J. R. R. Tolkien

LA MASTRO DE L' RINGOJ

LA KUNULARO DE L' RINGO

John Ronald Reuel Tolkien

La Mastro de l' Ringoj

Prologo

1. Pri hobitoj

Tiu ĉi libro pritraktas plejparte hobitojn, kaj per ĝiaj paĝoj la leganto povas eltrovi multon pri ties karaktero kaj iom pri ties historio. Pliajn informojn oni trovas en tiu elektaĵo el la Ruĝa Libro de Okcidentlimo, jam publikigita sub la titolo *La Hobito*. Tiu rakonto deriviĝis el la komencaj ĉapitroj de la Ruĝa Libro, verkitaj de Bilbo mem, la unua hobito, famiĝinta en la mondo ĝenerale, kaj de li titolitaj *Tien kaj Reen*, tial ke ili priskribis lian vojaĝon en la orienton kaj revene: aventuro, kiu poste implikis ĉiujn hobitojn en la grandajn okazaĵojn de tiu Epoko ĉi tie priskribataj.

Multaj tamen volos ekde la komenco scii pli pri tiu rimarkinda popolo, kaj iuj eventuale ne posedas la pli fruan libron. Por tiaj legantoj estas jen kelkaj notoj pri pli gravaj punktoj, kolektitaj el tradicioj de l' hobitoj, kaj la unua aventuro estas mallonge revokita.

La hobitoj estas popolo maltrudiĝema sed tre malnova, pli multnombra antaŭe ol hodiaŭ; ĉar ili amas pacon kaj trankvilon kaj bonan kultivitan grundon; bonorda terkulturaĵo estas ilia ŝatata frekventejo. Ili nek komprenas nek komprenis aŭ ŝatis maŝinojn pli komplikajn ol forĝbalgo, akvomuelilo, aŭ mana teksilo, kvankam ili uzis lerte laborilojn. Eĉ en la malnovaj tagoj ili kutime kondutis singarde pri "la granduloj", kiel ili nomas nin, kaj nuntempe ili evitas kun konsterniĝo nin kaj iĝas malfacile renkonteblaj. Ili bonege aŭdas kaj estas akravidaj, kaj kvankam ili estas dikiĝemaj kaj ne rapidas nenecese, ili tamen moviĝas elaste kaj lerte. Ili posedis ekde la komenco kapablon malaperi senprokraste kaj silente, kiam krude preterpasis granduloj, kiujn ili ne volis renkonti; kaj tiun kapablon ili jam evoluigis ĝis al la homoj ĝi eble ŝajnas magia. Sed la hobitoj fakte neniam studis ian ajn magion, kaj ilia fuĝivo rezultas sole el lerto profesieca, kiun heredo kaj ekzercado, kaj proksima amikeco al la tero, igis neimitebla de rasoj pli grandaj kaj pli mallertaj.

Ĉar ili estas popolo etstatura, pli malgrandaj ol gnomoj: malpli dikventraj kaj solidaj, nome, eĉ kiam efektive ne multe pli malaltaj. Ilia alteco varias inter du kaj kvar futoj laŭ nia mezurunuo. Malofte jam ili ĝiskreskas tri futojn; sed ili ŝrumpis, ili diras, kaj en la malnovaj tagoj estis pli altstaturaj. Laŭ la Ruĝa Libro, Bandobraso Tjuko (Bovblekulo), filo de Isengrimo Dua, altis kvar kaj duonan futojn kaj kapablis rajdi ĉevalon. Lin

superis laŭ ĉiuj hobitaj arĥivoj nur du famuloj de la malnova tempo; sed tiu kuriozaĵo estas en tiu ĉi libro traktota.

Kiom koncernas la hobitojn de la Provinco, pri kiuj temas ĉi tiuj rakontoj, dum l' epoko de siaj paco kaj prospero ili estis popolo gaja. Ili vestis sin helkolore, preferante precipe flavon kaj verdon; sed malofte ili portis ŝuojn, ĉar iliaj piedoj havis fortikajn ledecajn plandojn kaj estis kovritaj de densa bukla hararo tre simila al iliaj kapharoj, kiuj ĝenerale brunis. Tiel la sola metio malmulte praktikata inter ili estis la ŝufarado; sed longajn lertajn fingrojn ili havis kaj povis fabriki multajn aliajn aĵojn utilajn kaj belaspektajn. Pli ofte ol belaj, iliaj vizaĝoj estis ĝenerale bonhumoraj, larĝaj, brilokulaj, ruĝvangaj, kun buŝoj inklinaj al ridoj kaj al manĝado kaj trinkado. Kaj ili ja ridis kaj manĝis, kaj trinkis, ofte kaj entuziasme, ĉar ĉiam plaĉis al ili senkomplikaj ŝercoj, kaj ses manĝoj ĉiutage (kiam tiuj haveblis). Ili estis gastamaj kaj tre ĝuis festojn kaj donacojn, kiujn ili malavare disponigis kaj volontege akceptis.

Estas ja tre klare, ke malgraŭ postaj fremdiĝoj, la hobitoj estas niaj parencoj: pli proksimaj al ni ol la elfoj, aŭ eĉ la gnomoj. En la malnovaj tagoj ili parolis siamaniere la lingvojn de la homoj, kaj ŝatis aŭ malŝatis proksimume la samajn aferojn, kiel la homoj. Sed kia precize estas nia parenceco, tio ne plu estas malkaŝebla. La komenciĝo de la hobitoj troviĝas tre malproksime en la Antikva Epoko jam perdita kaj forgesita. Ankoraŭ konservas arĥivojn pri tiu malaperinta epoko nur la elfoj, kaj ties tradicioj koncernas preskaŭ tute ilian propran historion, en kiu aperas malofte la homoj, kaj la hobitoj tute ne estas menciitaj. Tamen estas evidente, ke la hobitoj efektive vivis kviete en Mez-Tero dum multaj longaj jaroj antaŭ ol aliuloj konsciis pri ili. Kaj pro tio, ke finfine la mondo plenplenas je nekalkuleble multaj strangaj kreitoj, tiuj etuloj ŝajnis relative malgravaj. Sed en la epoko de Bilbo kaj ties heredonto Frodo ili subite, kontraŭ sia volo, graviĝis kaj diskoniĝis, kaj ĝenis la interkonsiliĝojn de la Saĝuloj kaj la Eminentuloj.

Jam delonge forpasis tiuj tagoj, la Tria Epoko de Mez-Tero, kaj la konturoj de ĉiuj landoj ŝanĝiĝis; sed la regionoj, en kiuj tiam loĝis la hobitoj, estis sendube tiuj samaj, en kiuj ili plu restadas: la nord-okcidento de la Malnova Mondo, oriente de l' Maro. Pri sia origina hejmo la hobitoj en la epoko de Bilbo konservis neniun scion. Amo al klereco (escepte de genealogio) estis inter ili ne tre ofta, sed ankoraŭ restis kelkaj en la pli malnovaj familioj, kiuj studis la proprajn librojn, kaj eĉ kolektis de elfoj, gnomoj kaj homoj raportojn pri antaŭaj epokoj kaj malproksimaj landoj. Iliaj propraj analoj komenciĝis nur post enloĝiĝo en la Provinco, kaj iliaj plej antikvaj legendoj rerigardis apenaŭ pli malproksimen ol ĝis iliaj Tagoj

Vagabondaj. Estas tamen evidente, per tiuj legendoj kaj per la atestaĵo de iliaj strangetaj vortoj kaj kutimoj, ke samkiel multaj aliaj popoloj la hobitoj dum la malproksima pasinteco translokiĝis okcidenten. Iliaj plej fruaj historioj ŝajnas ekvidigi epokon, dum kiu ili loĝadis la pli altajn valojn de Anduino, inter la randaĵoj de l' Verdarbaro Granda kaj la Nebulecaj Montoj. Kial ili poste entreprenis la malfacilegan kaj danĝerplenan transiron de l' montoj en Eriadoron, tio ne plu estas certa. Iliaj propraj analoj mencias multobliĝon de homoj en la lando kaj ombron, kiu kovris la arbaron, tiel ke ĝi malheliĝis kaj ĝia nova nomo estis Mornarbaro.

Antaŭ la transiro de l' montoj la hobitoj jam dividiĝis en tri iom malsimilajn rasojn: harfutoj, sturoj kaj falohidoj. La harfutoj estis pli brunhaŭtaj, pli malgrandaj kaj pli malaltaj, kaj ili estis senbarbaj kaj senbotaj. Iliaj manoj kaj piedoj estis netaj kaj lertmovaj; kaj ili preferis altejojn kaj montdeklivojn. La sturoj estis pli larĝstaturaj, pli pezkorpaj; iliaj piedoj kaj manoj estis pli grandaj; kaj ili preferis ebenaĵojn kaj riverbordojn. La falohidoj havis pli blondajn haŭton kaj hararon, kaj ili estis ankaŭ pli altaj kaj pli maldikaj ol la aliaj; ili amis arbarojn kaj boskojn.

La harfutoj en la malnovaj epokoj havis multajn kontaktojn kun la gnomoj kaj longe loĝadis la antaŭdeklivojn de la montoj. Ili frue translokiĝis okcidenten kaj vagis trans Eriadoron ĝis Veterverto, dum la aliaj troviĝis ankoraŭ en Sovaĝujo. Ili estis la plej normala kaj reprezenta speco de hobito, kaj proporciege la plej multnombra. Pli ol aliaj ili emis restadi en unu loko, kaj plej longe konservis sian prakutimon loĝi en tuneloj kaj truoj.

La sturoj restadis longe sur la bordoj de la Riverego Anduino, kaj malpli evitis la homojn. Ili okcidentiris post la harfutoj kaj sekvis la fluon suden de Bruakvo; kaj tiel multaj el ili longe loĝadis inter Tarbado kaj la limoj de Dunlando, antaŭ ol translokiĝi norden denove.

La falohidoj, la malplej multnombraj, estis norda branĉo. Ili pli ol la aliaj hobitoj amikiĝis kun elfoj, kaj pli lertis pri lingvo kaj kantado ol pri metilaboro; kaj pratempe ili prefere ĉasadis ol plugadis. Ili transiris la montojn norde de Rivendelo kaj laŭiris la riveron Prujnelo. En Eriadoro ili baldaŭ intermiksiĝis kun la aliaj specoj pli frue alvenintaj, sed pro tio, ke ili estis iom pli bravaj kaj pli aventuremaj, ili ofte troviĝis kiel erninentuloj aŭ ĉefoj en klanoj de harfutoj aŭ sturoj. Eĉ dum l' epoko de Bilbo ankoraŭ rimarkeblis forta falohida heredeco inter la pli eminentaj familioj, kiel Tjukoj kaj la mastroj de Boklando.

En la okcidenta regiono de Eriadoro, inter la Nebulecaj Montoj kaj la Montoj de Ljuno, la hobitoj trovis kaj homojn kaj elfojn. Efektive, ankoraŭ loĝis tie restaĵo el la dunadanoj, reĝoj de l' homoj venintaj trans la maron el

Okcidentio; sed ili estis rapide malmultiĝantaj, kaj la tero de ilia Norda Reĝlando larĝe dezertiĝadis. Troviĝis pli ol sufiĉe da loko por enmigrantoj, kaj postnelonge la hobitoj komencis enloĝiĝi en ordaj komunumoj. Plejparte iliaj fruaj loĝlokoj jam delonge malaperis kaj forgesiĝis je l' epoko de Bilbo; sed unu, kiu tre frue graviĝis, plu ekzistis, kvankam reduktita laŭ amplekso; tiu troviĝis ĉe Brio kaj en la ĉirkaŭa Ĉetarbaro, proksimume kvardek mejlojn oriente de l' Provinco.

Estis dum tiuj fruaj tagoj, sendube, ke la hobitoj lernis la abocon kaj komencis skribi laŭ la maniero de l' dunadanoj, kiuj siavice, antaŭ tre longe, lernis tiun arton de la elfoj. Kaj ŝame en tiu tempo ili forgesis la lingvojn, kiaj ajn ili estis, pli frue uzitajn, kaj ĉiam poste parolis la Lingvon Komunan, Okcidentaĵon kiel oni nomis ĝin, aktualan en ĉiuj reĝlandoj de Arnoro ĝis Gondoro, kaj laŭlonge de ĉiuj bordoj de l' Maro de Belfalaso ĝis Ljuno. Tamen ili retenis plurajn vortojn proprajn, kiel ankaŭ la proprajn nomojn de monatoj kaj tagoj kaj grandan amason da personaj nomoj el la pasinteco.

Ĉirkaŭ tiu tempo la legendaro inter la hobitoj historiiĝas la unuan fojon kun kalkulado de jaroj. Ĉar okazis en la mil sescent unua jaro de la Tria Epoko, ke la falohidaj fratoj Marĥo kaj Blanko ekvojaĝis el Brio, kaj ricevinte permeson de l' Alta Reĝo en Fornosto[1] ili transiris la brunan riveron Baranduino kun granda sekvantaro de hobitoj. Ili transiris la ponton Ŝtonarkoj, kiu estis konstruita dum la epoko de la potenco de l' Norda Reĝlando, kaj ili okupis la tutan teritorion aliflankan por sia loĝloko, inter la rivero kaj la Distaj Deklivoj. Postulate estis nur tio, ke ili tenu riparita la Grandan Ponton kaj ĉiujn ceterajn pontojn kaj vojojn, faciligu trairon de la reĝaj kurieroj, kaj rekonu la estrecon de la reĝa moŝto.

Tiel komenciĝis la *Provinc-datumo*, ĉar la jaro de l' transiro de Brandovino (kiel la hobitoj misformis la nomon) iĝis Jaro Unu de la Provinco, kaj oni kalkulas ekde ĝi ĉiujn postajn datojn[2]. Tuj la okcidentaj hobitoj ekamis sian novan landon, kaj ili restadis tie kaj baldaŭ forpasis el la historio de la homoj kaj de la elfoj. Dum reĝoj troviĝis, ili estis formale sub ties rego, sed regis ilin fakte la propraj ĉefoj, kaj ili neniel enmiksiĝis en okazaĵojn de l' ekstera mondo. Al la lasta batalo ĉe Fornosto kontraŭ la Sorĉmastro de Angmaro ili sendis iujn pafarkistojn por helpi la reĝon, aŭ tion ili asertis, kvankam neniuj analoj de la homoj tion registris. Sed en tiu milito finiĝis la Norda Reĝlando; kaj poste la hobitoj transprenis por si la teritorion, kaj ili elektis el inter siaj ĉefoj Superulon, kiu posedu la aŭtoritaton de la foririnta reĝo. Kaj post la Nigra Pesto (37 P. D.) ili dum mil jaroj multiĝis kaj vivis en paco preskaŭ seninterrompa, ĝis kiam ilin plagis la Longa Vintro, kaŭzinta grandan hungron. Tiam multaj

malsatmortis, sed je l' momento de nia rakonto la Tagoj de l' Mizerego (1158-1160) jam historiiĝis kaj forgesiĝis, kaj la hobitoj denove kutimiĝis al abundo kaj prospero. La teritorio estis fekunda kaj malsovaĝa, kaj kvankam, kiam ili suriris ĝin, ĝi estis delonge forlasita, ĝi estis antaŭe zorge kulturita, kaj tie siatempe la reĝo posedis multajn bienojn, tritikokampojn, vitojn kaj arbarojn.

Cent kvindek mejlojn ĝi etendiĝis ekde la Okcidentejo malsupre de la Turmontetoj ĝis la Ponto Brandovino, kaj preskaŭ same ekde la norda erikejo ĝis la marĉoj en la sudo. Tion la hobitoj nomis la Provinco, kiel la aŭtoritatan regionon de sia Superulo kaj distrikton de bonordaj okupiĝoj, kaj tie en tiu agrabla mondangulo ili praktikis siajn bonordajn vivokupiĝojn, kaj ĉiam malpli ili atentis pri la ekstera mondo, kie moviĝis malhelaĵoj, ĝis fine ili supozis, ke paco kaj abundo estas normalaj en Mez-Tero, al kiuj ĉiu sagaculo estas rajtigita. Ili forgesis aŭ ignoris tiun malmulton, kiun ili iam sciis pri la Gardistoj, kaj pri la klopodoj de tiuj, kiuj igis ebla la longan pacon de la Provinco. Ili estis efektive ŝirmataj, sed tion ili jam delonge ĉesis memori.

Neniam estis militemaj iuj ajn hobitoj, kaj neniam ili estis batalintaj inter si. En la malnova epoko ili kompreneble devis ofte batali por sin defendi en la mondo rigora; sed en la epoko de Bilbo tio estis historio tre antikva. La lasta batalo, antaŭ la komenciĝo de tiu ĉi rakonto, kaj fakte la ununura iam okazinta sur la teritorio de la Provinco, estis antaŭ la memoro de la vivantoj: la Batalo de Verdkampoj, P. D. 1147, en kiu Bandobraso Tjuko haltigis ork-invadon. Eĉ la vetero estis plimildiĝinta, kaj lupoj, kiuj iam predocelis el la nordo dum severaj vintroj, estis jam nur rakonto de la avoj. Sekve, kvankam restis kelka stoko da armiloj en la Provinco, tiuj estis uzataj precipe kiel trofeoj, pendantaj super fajrujoj aŭ sur muroj, aŭ kolektitaj en la muzeo ĉe Mult-Fosejo. Tion oni nomis la Madom-domo, ĉar kion ajn la hobitoj ne plu bezonis, tion ili nomis *madomo*. Iliaj loĝejoj emis iom plenpleniĝi je madomoj, kaj multaj el la donacoj, kiuj pasis de mano al mano, estis tiaj.

Facila kaj trankvila vivo tamen lasis ĉi popolon plu strange fortika. En okazo de neceso oni malfacile timigis aŭ mortigis ilin; kaj eble ili tiel senlace frandadis luksaĵojn ankaŭ pro tio, ke ili kapablis, se necese, senĝene malhavi ilin kaj travivi mistraktadon fare de doloro, malamikoj aŭ la vetero kun eltenemo miriga al tiuj, kiuj ne bone konis ilin kaj juĝis nur laŭ iliaj ventroj kaj bone nutritaj vizaĝoj. Kvankam malemaj kvereli kaj mortigantaj nenion vivantan pro sporto, atakite ili tre kuraĝis kaj povis laŭnecese uzi armilojn. Pafarkon ili sciis bone utiligi, ĉar ili estis akrokulaj kaj celtrafaj. Ne nur pafarke. Se iu ajn hobito kliniĝis por enmanigi ŝtonon, estis

konsilinde serĉi azilon rapide, kion tre bone sciis ĉiuj entrudiĝemaj bestoj.

Ĉiuj hobitoj origine loĝis en subteraj truoj, aŭ tion ili kredis, kaj en tiaj loĝejoj ili pleje sentis sin hejme; sed kun la pasado de la tempo ili devis alproprigi aliajn specojn de loĝado. Efektive, en la Provinco dum la epoko de Bilbo kutime nur la plej riĉaj kaj la plej malriĉaj hobitoj daŭrigis la malnovan moron. La plej malriĉaj daŭre loĝadis plej primitivajn subterejojn, ja nurajn truojn, kun unusola aŭ neniu fenestro; dume la bonstatuloj konstruis versiojn pli luksajn de la malnovepokaj simplaj elfosaĵoj. Sed taŭgaj situoj por tiuj grandaj kaj disbranĉantaj tuneloj (aŭ *smialoj*, kiel oni nomis ilin) ne estis ĉie troveblaj; kaj sur la platejoj kaj la malaltaj distriktoj la hobitoj, multobliĝantaj, komencis konstrui sur la tersurfaco. Efektive, eĉ en la montetaj regionoj kaj pli malnovaj vilaĝoj, kiel Hobiturbo aŭ Tjukboro, aŭ en la ĉefa urbo de la Provinco, Mult-Fosejo sur la Blankaj Suprejoj, troviĝis jam multaj domoj lignaj, brikaj aŭ ŝtonaj. Tiujn aparte ŝatis muelistoj, feraĵistoj, ŝnurfaristoj kaj ĉarfaristoj kaj aliaj uloj tiaspecaj; ĉar eĉ kiam ili posedis loĝtruojn, la hobitoj jam delonge kutimis konstrui budojn kaj laborejojn.

Laŭdire la kutimo konstrui biendomojn kaj provizejojn komenciĝis inter loĝantoj de Mariŝo apud Brandovino. La hobitoj de tiu regiono, Orient-kvarono, estis iom grandaj kaj pezkruraj, kaj ili vestis gnombotojn, kiam kotecis la vetero. Sed estis bonkonate, ke ili estis laŭherede grandparte sturoj, kion fakte evidentigas la vilaĵo kreskinta sur la mentonoj. Neniu harfuto aŭ falohido havis eĉ ombron de barbo. Efektive, la popolo de Mariŝo, kaj de Boklando oriente de l' Rivero, kie ili poste enloĝiĝis, venis en la Provincon plejparte de l' sudo; kaj ili ankoraŭ retenas multajn strangajn nomojn kaj fremdajn vortojn ne troveblajn aliloke en la Provinco.

Verŝajne la konstrametio, kiel ankaŭ multaj aliaj metioj, deriviĝis de la dunadanoj. Sed eble la hobitoj lernis ĝin rekte de la elfoj, instruintoj al la homoj dum ties juneco. Ja la elfoj de l' Alta Parencaro ankoraŭ ne forlasis Mez-Teron, kaj ili loĝis ankoraŭ tiutempe ĉe la Grizaj Havenoj en la malproksima okcidento, kaj en aliaj lokoj alireblaj el la Provinco. Oni povis plu vidi tri elf-turojn tre antikvajn trans la okcidentaj limteritorioj. Ili brilis lontane en la lunlumo. La plej alta plej malproksimis, starante sola sur verda monteto. La hobitoj de Okcident-kvarono diris, ke de la supro de tiu turo la Maro videblas; sed oni neniam aŭdis, ke iu hobito ĝin surgrimpis. Efektive, malmultaj hobitoj iam ajn vidis aŭ surnavigis la Maron, kaj eĉ malpli multaj iam revenis por raporti tion. La plimultaj hobitoj ege malfideme sintenis eĉ al riveroj kaj boatetoj, kaj malmultaj el ili sciis naĝi. Kaj dum longiĝis la epoko de la Provinco ili ĉiam malpli interparolis kun la elfoj kaj komencis timi ilin kaj malfidi tiujn, kiuj interrilatis kun ili; kaj la Maro iĝis timiga

vorto inter ili kaj aŭguro de morto, kaj ili turnis siajn vizaĝojn for de l' montetoj en la okcidento.

La konstrumetio eble devenis de la elfoj aŭ homoj, sed ĝin la hobitoj utiligis laŭ propra maniero. Turojn ili ne entreprenis. Iliaj domoj kutime estis longaj, malaltaj kaj komfortaj. La plej malnova speco estis efektive nenio alia ol konstruitaj imitaĵoj de *smialoj*, kun tegmentoj el seka herbo aŭ pajlo, aŭ el razenbuloj, kaj kun muroj iom konveksaj. Tiu etapo tamen limiĝis al la frua epoko de la Provinco, kaj hobita konstruado jam delonge aliiĝis, plibonigita laŭ adaptaĵoj, lernitaj de gnomoj aŭ elpensitaj de la hobitoj mem. Prefero al rondaj fenestroj, kaj eĉ rondaj pordoj, estis la ĉefa restanta apartaĵo de l' arĥitekturo hobita.

La domoj kaj la truoj de la Provinc-hobitoj estis ofte grandaj, kaj en ili loĝis grandaj familioj. (Bilbo kaj Frodo Baginzoj, estante fraŭlaj, estis tre maltipaj, kiaj ili estis ankaŭ laŭ multaj aliaj rilatoj, ekzemple ilia amikeco kun elfoj.) Kelkfoje, kiel ekzemple ĉe Tjukoj de Grandaj Smialoj, aŭ Brandobokoj de Brando-Halo, multaj generacioj de parencoj kunloĝadis (relative) pace en unusola prapatra kaj multtunela domego. Ĉiuj hobitoj estis ĉiuokaze familiemaj kaj tre zorge kontrolis sian parencecon. Ili konstruis longajn komplikajn arbojn de familio kun sennombraj branĉoj. Kiam oni intertraktas kun la hobitoj, estas grave memori, kiu parencas al kiu kaj kiagrade. Estas neeble en tiu ĉi libro elmeti arbon familian, kiu inkluzivus eĉ la plej gravajn anojn de l' pli gravaj familioj en la epoko, pri kiu temas ĉi tiuj rakontoj. La genealogiaj arboj fine de l' Ruĝa Libro de Okcidentejo en si mem formas etan libron kaj ĉiuj krom la hobitoj trovus ilin ekstreme enuigaj. Al la hobitoj tre plaĉas tiaj aferoj, se ili estas seneraraj: ili ŝatas havi librojn plenajn je aferoj, kiujn ili jam konas, elmetitaj juste-ĝuste, sen kontraŭdiroj.

2. Pri pip-herbo

Alia afero pri la antikvaj hobitoj estas mencienda, kutimo miriga: ili ensorbis aŭ enspiris, pere de pipoj argilaj aŭ lignaj, fumon de l' brulantaj folioj de herbo, kiun ili nomis *pip-herbo* aŭ *folio*, verŝajne variaĵo de *Nicotiana*. Multe da mistero ĉirkaŭis la originon de tiu stranga moro, aŭ "arto", kiel la hobitoj preferas nomi ĝin. Ĉio trovebla pri ĝi en la antikvaj epokoj estis kunmetita de Gajadoko Brandoboko (poste Mastro de Boklando), kaj pro tio, ke li kaj la tabako de Sud-kvarono iom rolas en la rakonto, kiu sekvos, oni rajtas citi liajn komentojn en la enkonduko de lia *Herbokonoj de la Provinco*.

«Tio, — li diras, — estas la unika arto, kiun ni rajtas senrezerve pretendi kiel nian propran inventaĵon. Ne estas konate, kiam komencis fumi la

hobitoj: ĉiuj legendoj kaj familiaj historioj traktas ĝin kvazaŭ naturan; dum longa tempo la Provinc-loĝantoj fumis diversajn kreskaĵojn, iujn pli fetorajn, iujn pli agrablajn. Sed inter si konsentas ĉiuj analoj, ke Toboldo Kornblovulo el Longfundo en Sud-kvarono estis la unua, kiu kultivis la malfalsan pip-herbon en siaj ĝardenoj dum la epoko de Isengrimo la Dua ĉirkaŭ la jaro 1070 laŭ la Provincdatumo. Ankoraŭ nun la plej bonkvalita hejmkreskintaĵo devenas de tiu distrikto, precipe la variaĵoj, kiuj nomiĝas Longfunda Folio, Maljuna Toĉjo, kaj Suda Stelo.

Kiel Maljuna Toĉjo akiris la plantaĵon ne estas skribite, ĉar ĝis la mortohoro li rifuzis tion sciigi. Li bone konis la herbojn, sed li neniel vojaĝemis. Oni diras, ke dum sia juneco li ofte iris ĝis Brio, kvankam li certe neniam plimalproksimiĝis ol tiom de la Provinco. Estas sekve tute eble, ke li eksciis pri tiu ĉi plantaĵo en Brio, kie ĉiuokaze nuntempe ĝi bone kreskas sur la sudaj deklivoj de la montetoj. La Bri-hobitoj pretendas, ke ili estas la unuaj efektivaj fumantoj de la pip-herbo. Kompreneble, ili pretendas esti farintaj ĉion ajn pli frue ol la loĝantoj de la Provinco, kiujn ili nomas “koloniistoj”; sed en tiu ĉi kazo ilia pretendo, mi opinias, estas tre verŝajne vera. Kaj certe el Brio disvastiĝis dum la lastaj jarcentoj fumado de la malfalsa herbo inter gnomoj kaj tiuj aliaj estaĵoj, vagabondoj, sorĉistoj aŭ vagantoj, kiuj ankoraŭ trapasas tien-reen tra tiu antikva vojrenkontiĝejo. Tiel la hejmo kaj centro de la arto troviĝas en la malnova trinkejo de Brio, *La Pranca Poneo*, kiun posedas la familio Buterburo ekde l’ epokoj antaŭanalaj.

Malgraŭ ĉio, mia observado dum miaj multaj vojaĝoj al la sudo konvinkis min, ke la herbo mem ne indiĝenas en nia mondparto, sed venis norden el la malsupra Anduino, kien ĝi estis, laŭ mia supozo, alportita origine trans la Maron fare de la Homoj de Okcidentio. Ĝi kreskas abunde en Gondoro, kaj estas tie pli riĉa kaj pli granda ol en la nordo, kie oni neniam trovas ĝin sovaĝa, kaj ĝi prosperas nur en lokoj varmaj kaj ŝirmataj, kiel Longfundo. La homoj de Gondoro nomas ĝin *dolĉa galeno*, kaj ĝin alte taksas nur pro la parfumo de ĝiaj floroj. El tiu lando ĝi certe estis portita tra l’ Verdvojo dum la longaj jarcentoj inter la alveno de Elendilo kaj nia propra epoko. Sed eĉ la dunadanoj de Gondoro permesas al ni tiun meriton, ke unue enpip- igis ĝin hobitoj. Eĉ la sorĉistoj ne pensis pri tio pli frue ol ni. Tamen unu sorĉisto konata al mi ekpraktikis tiun arton antaŭlonge kaj fariĝis tiel lerta pri ĝi, kiel pri ĉiuj aliaj aferoj, al kiuj li turnis sian atenton.»

3. Pri la ordigo de la Provinco

La Provinco estis kvaronigita: je l’ limlandoj jam aluditaj, Norda, Suda, Orienta kaj Okcidenta; kaj tiuj estis siavice dividitaj je kelkaj popollandoj,

kiuj ankoraŭ havis la nomojn de iuj malnovaj ĉeffamilioj, kvankam en la epoko de tiu ĉi historio tiuj nomoj jam ne troviĝis nur en la propraj popollandoj. Preskaŭ ĉiuj Tjukoj ankoraŭ loĝadis en Tjuklando, sed tiel ne estis pri multaj aliaj familioj, kiel la Baginzoj aŭ la Bofinoj. Ekster la kvaronoj troviĝis distriktoj orienta — tio estas Boklando — kaj okcidenta, kiu estis oficiale aneksita al la Provinco en 1462 (P. D.)

La Provinco tiutempe apenaŭ havis "registaron". La familioj plejparte aranĝis siajn proprajn aferojn. Kultivado de nutraĵo kaj ties manĝado okupis la plejparton de ilia tempo. Pri aliaj aferoj ili estis kutime malavaraj kaj ne akiremaj, sed kontentaj kaj moderaj, tiel ke bienoj, farmejoj, laborejoj kaj malgrandaj metioj emis resti neŝanĝitaj tra generacioj. Restis, kompreneble, la antikva tradicio pri la alta reĝo en Fornosto, aŭ Norbrio kiel oni nomis ĝin, fornorde de la Provinco. Tamen la hobitoj ankoraŭ diris pri sovaĝuloj aŭ malvirtaj kreaĵoj (ekzemple troloj), ke ili neniam aŭdis pri la reĝo. La reĝon de la malnova epoko ili respondecigis pri ĉiuj siaj nemalhaveblaj leĝoj; kaj kutime ili propravole agis laŭleĝe, ĉar temis pri la Reguloj (kiel ili diris), tiel antikvaj kiel justaj.

Estis vere, ke longe eminentis elstare la familio Tjuko; ĉar la superula ofico transiris al ili (de la Oldbokoj) kelkajn jarcentojn pli frue, kaj la Tjukestro ekde tiam posedis tiun titolon. La Superulo estis mastro de l' Provinc-kunsido, kaj kapitano de la Provinc-armeo kaj de la hobit-armaĵo, sed pro tio, ke armeo kaj kunsido ekzistis nur en krizaj situacioj, kiuj ne plu okazis, la superuleco jam ĉesis esti pli ol honorigo. Ja la familio Tjuko plu ricevis apartan respekton, ĉar ĝi restis kaj multnombra kaj tre riĉa, kaj emis en ĉiu generacio aperigi fortajn karakterojn kun strangaj moroj kaj eĉ aventurema temperamento. Tiujn lastajn kvalitojn, tamen, oni jam pli toleris (rilate la riĉulojn) ol ĝenerale aprobis. Daŭris malgraŭ tio la kutimo aludi al la familiestro kiel La Tjuko, kaj aldoni al ties nomo, se necese, ciferon: ekzemple Isengrimo la Dua.

La sola oficialulo en la Provinco tiuepoke estis la Urbestro de Mult-Fosejo (aŭ de la Provinco), kiu estis elektita ĉiun sepan jaron ĉe la Libera Foiro sur la Blankaj Suprejoj je somermezo. Lia preskaŭ sola urbestra devo estis prezidi ĉe bankedoj, starigitaj je la Provincferioj, kiuj okazis ofte. Sed la oficoj de la Poŝtestro kaj Ĉefa Ŝirifo ligiĝis al la urbestreco, tiel ke li respondecis kaj pri la Kuriera Servo kaj pri la Gardistaro. Tiuj estis la solaj Provinc-servadoj, kaj la kurieroj estis el la du la pli multnombraj, kiel ankaŭ la pli okupataj. Tute ne ĉiuj hobitoj scipovis skribi, sed la scipovantoj skribis konstante al ĉiuj siaj amikoj (kaj al elektitaj parencoj), kiuj loĝis pli malproksime ol je posttagmeza promeno.

ŝirifoj estis la nomo donita de l' hobitoj al siaj policanoj, t. e. ties plej

proksimaj ekvivalentoj. Ili kompreneble ne posedis uniformon (ĉar tiaj aferoj estis tute nekonataj), nur plumon en la ĉapo; kaj praktike ili estis pli heĝkontrolistoj ol policanoj, pli okupataj pri l' vagado de bestoj ol de personoj. En la tuta Provinco troviĝis nur dekduo da ili, po tri en ĉiu kvarono, por internaj deĵoroj. Iom pli multnombra aro, laŭbezone varianta, estis uzata por kontroli la landlimon, kaj por certigi, ke eksteruloj kiaj ajn, grandaj aŭ malgrandaj, ne fariĝu ĝenaj.

En la tempo, kiam komenciĝas tiu ĉi historio, la Limuloj, kiel oni nomis ilin, estis pli multnombraj. Aŭdiĝis multaj raportoj kaj plendoj pri fremdaj personoj kaj kreaĵoj, kiuj ŝtelumadis apud aŭ eĉ cis la limoj: la unua signo, ke ĉio ne estas tute tia, kia ĝi devas esti kaj ĉiam estis, krom en rakontoj kaj legendoj el la pratempo.

Malmultaj atentis tiun signon, kaj ankoraŭ eĉ Bilbo ne havis ian koncepton pri tio, kion ĝi aŭguris. Jam pasis sesdek jaroj de kiam li komencis sian memorindan vojaĝon, kaj li estis maljuna eĉ inter hobitoj, kiuj tre ofte centjariĝis; sed evidente multo ankoraŭ restis el la konsiderinda riĉaĵo, kiun li revene kunportis. Kioman multon aŭ malmulton li malkaŝis al neniu, eĉ ne al Frodo, lia plej ŝatata nevo. Kaj li plu tenis sekreta la ringon, kiun li trovis.

4. Pri la trovo de la Ringo

Kiel estas rakontite en *La Hobito*, venis iun tagon al la pordo de Bilbo la granda sorĉisto, Gandalfo la Griza, kun dek tri gnomoj: fakte neniu alia ol Torino Kverkaŝildo, posteulo de reĝoj, kaj ties dek du kunuloj en ekzilo. Kun ili li ekiris, je sia propra daŭra miro, iun matenon en aprilo — tio estis en la jaro 1341 laŭ la Provinc-datumo — serĉante grandan trezoron, la gnom-amasigojn de l' Reĝoj sub la Monto, malsuper Ereboro en Dalo, malproksime en la Oriento. La serĉo sukcesis, kaj la drako, kiu gardis la amasigon, estis mortigita. Tamen, kvankam antaŭ la fina venko okazis la Batalo de l' Kvin Armeoj, kaj Torino estis mortigita, kaj plenumiĝis multaj kuraĝaj faroj, la afero apenaŭ interesus la postan historion aŭ meritus pli ol subnoton en la longaj analoj de l' Tria Epoko, se ne estus okazinta "hazardaĵo" survoje. La kunularon atakis orkoj en alta trapasejo de l' Nebulecaj Montoj, kiam ĝi survojis al Sovaĝujo; kaj okazis tiel, ke Bilbo vojperdis dum kelka tempo en la nigraj ork-minejoj profunde sub la montaro, kaj tie, dum li palpiris vane en la senlumo, li metis manon sur ringon kuŝantan sur la subaĵo de tunelo. Ĝin li enpoŝigis. Tio ŝajnis tiam nura bonŝanco.

Klopodante trovi elirejon, Bilbo daŭrigis malsupren ĝis la fundaĵoj de l' montaro, ĝis ne eblis plueniri. Funde de l' tunelo sterniĝis frida lago

malproksimega de la lumo, kaj sur roka insulo en la akvo loĝis Golumo. Li estis abomeninda kreaĵeto; li padelis boateton per siaj grandaj plataj piedoj, strecĥrigardante per palaj lumantaj okuloj kaj kaptante blindajn fiŝojn, kiujn li manĝis krudajn. Li manĝis ĉian vivantaĵon, eĉ orkon, se li povis kapti kaj strangoli ĝin senlukte. Li posedis sekretan trezoraĵon, kiu alvenis al li antaŭ longe-longe, kiam li ankoraŭ loĝis en la lumo: ringon el oro, kiu nevidebligis tiun, kiu surfingrigis ĝin. Ĝi estis lia unika amataĵo, lia "trezorego", kaj li alparolis ĝin, eĉ kiam li ne kunportis ĝin. Ĉar li sekure kaŝis ĝin en truo sur sia insulo, krom kiam li ĉasadis aŭ spionadis pri la orkoj de l' minejoj.

Eble li estus tuj atakinta Bilbon, se li portus la ringon okaze de l' renkontiĝo; sed tiel ne estis, kaj la hobito tenis en sia mano elfan tranĉilon, kiun li uzis kiel glavon. Do por gajni tempon, Golumo defiis Bilbon pri la enigmoludo, dirante, ke, se li starigus enigmon, kiun Bilbo ne povus solvi, tiam li mortigus kaj manĝus lin; sed se Bilbo venkus lin, tiam li farus laŭ la volo de Bilbo: li kondukus lin ĝis vojo el la tuneloj.

Pro tio, ke li estis senespere vojperdinta en la mallumo kaj povis iri nek antaŭen nek malantaŭen, Bilbo akceptis la defion; kaj ili starigis unu al la alia multajn enigmojn. Fine Bilbo venkis en la ludo, pli per bonŝanco (laŭŝajne) ol per sprito; ĉar post kelka tempo mankis al li plua enigmo, kaj li ekkriis, kiam lia mano trafis la ringon, kiun li trovis kaj forgesis: "Kion mi havas en mia poŝo?" Tion Golumo malsukcesis solvi, kvankam li postulis tri provojn.

Vere, la aŭtoritatuloj malkonsentas inter si, ĉu tiu lasta demando estis nura "demando", kaj ne "enigmo" laŭ la rigoraj reguloj de la ludo; sed ĉiuj konsentas, ke akceptinte ĝin kaj provinte diveni la respondon, Golumo estis ligita de la promeso. Kaj Bilbo insistadis, ke li plenumu sian vorton; ĉar ekvenis al li en la kapon, ke tiu ŝlima kreaĵo eble montriĝos falsa, malgraŭ tio, ke tiajn promesojn oni rigardis kiel sanktajn, kaj en la pratempo ĉiuj krom la plej malvirtegaj uloj timis malplenumi ilin. Sed post epokoj da izoleco en la mallumo la koro de Golumo estis nigra kaj enhavis perfidemon. Li forglitis, kaj reiris al sia insulo, pri kiu Bilbo sciis nenion, ne malproksima en la malhela akvo. Tie, li supozis, troviĝis lia ringo. Li estis jam malsata kaj kolera, kaj kiam li havus sian "trezoregon", li timus tute neniun armilon.

Sed la ringo ne estis sur la insulo; li ĝin perdis, ĝi estis for. Lia kriĉo tremigis al Bilbo la dorson, kvankam li ankoraŭ ne komprenis, kio estis okazinta. Sed Golumo jam ekdivenis, tro malfrue. "Kion ĝi havas en siaj poŝoj?" li kriis. La lumo en liaj okuloj similis verdan flamon dum li rekurŭdis por murdi la hobiton kaj rehavi sian "trezoregon". Ĝustatempe

Bilbo konstatis la danĝeron, kaj li fuĝis blinde laŭ la koridoro malal la akvo; kaj ankoraŭfoje lin savis lia bonŝanco. Ĉar kurante li enpoŝigis sian manon, kaj la ringo kviete surfingriĝis. Tiel okazis, ke Golumo preterpasis ne vidante lin kaj pluiris por bari la elirvojon, ke la "ŝtelinto" ne eskapu. Singarde Bilbo sekvis lin dum li iradis sakrante kaj parolante al si pri sia "trezorego"; laŭ tiu parolado eĉ Bilbo finfine divenis la veron, kaj espero venis al li en la mallumo: li mem trovis la mirindan ringon kaj eblecon eskapi de la orkoj kaj de Golumo.

Fine ili haltis antaŭ nevidita trairejo, kiu kondukis al la subaj pordoj de l' minejoj je l' orienta flanko de la montoj. Tie Golumo kaŭris batalpreta, flarante kaj aŭskultante; kaj Bilbo tentiĝis mortigi lin per sia glavo. Sed kompato malhelpis lin, kaj kvankam li retenis la ringon, en kiu troviĝis lia sola espero, li rifuzis uzi ĝin por helpi en mortigo de la mizera kreaĵo malavantaĝa. Fine, strečante sian kuraĝon, li transsaltis Golumon en la mallumo, kaj fuĝis laŭ la koridoro, sekvate de l' krioj malamaj kaj senesperaj de sia malamiko: "*Ŝtelinto, ŝtelinto! Baginzo! Ni malamas ĝin por ĉiam*!"

Nu, estas fakto stranga, ke tio ne estas la historio tia, kia ĝin Bilbo unue rakontis al siaj kunuloj. Al ili li rakontis, ke Golumo promesis al li *donacon*, se li venkus en la ludo; sed kiam Golumo iris por alporti ĝin de la insulo, li trovis, ke la valoraĵo estis for: la magia ringo, kiun oni donacis al li antaŭlonge je lia naskiĝfesto. Bilbo divenis, ke tio estas la ringo mem, kiun li trovis, kaj pro tio, ke li venkis en la ludo ĝi jam estis rajte lia propraĵo. Sed estante en danĝera situacio, li nenion diris pri ĝi, kaj devigis Golumon montri al li la elirvojon kompensaĵe anstataŭ donace. Tiun priskribon Bilbo registris en siaj memuaroj, kaj ŝajnas, ke li neniam mem ŝanĝis ĝin, eĉ ne post la Konsiliĝo ĉe Elrondo. Evidente ĝi plu aperis en la origina Ruĝa Libro, kiel ankaŭ en pluraj el la kopioj kaj eltiraĵoj. Sed multaj kopioj enhavas la veran priskribon (kiel alternativon), sendube derivitan de notoj far Frodo aŭ Samsaĝo, kiuj ambaŭ eksciis la veron, kvankam ŝajne ili malemis forstreki ion ajn efektive skribitan de la maljuna hobito mem.

Gandalfo, aliflanke, malkredis la unuan rakonton de Bilbo, tuj kiam li aŭdis ĝin, kaj li daŭre scivolemis pri la ringo. Fine li havigis de Bilbo la veran rakonton post multa demandado, kiu provizore malvarmigis ilian amikecon; sed ŝajnis, ke la sorĉisto taksis grava la veron. Kvankam tion li ne diris al Bilbo, li ankaŭ taksis grava kaj perturba la konstaton, ke la bona hobito ne diris ekde la komenco la veron: tute kontraŭe al ties kutimo. La koncepto pri "donaco" ne estis nura hobiteca elpensaĵo, malgraŭ ĉio. Tion sugestis al Bilbo, laŭ lia konfeso, la subaŭskultita parolado de Golumo; ĉar Golumo fakte nomis la ringon sia "naskiĝfesta donaco", plurfoje. Ankaŭ

tion Gandalfo trovis stranga kaj suspektinda; sed la veron pri tiu ĉi punkto li ne eltrovis ĝis post multaj jaroj, kiel vidiĝos en tiu ĉi libro.

Pri la postaj aventuroj de Bilbo ne necesas multon diri ĉi tie. Per helpo de la ringo li eskapis de la ork-gardistoj antaŭ la pordo kaj reatingis siajn kunulojn. Li uzis la ringon multfoje dum sia serĉvojaĝo, ĉefe por helpi al siaj amikoj; sed li kaŝis ĝin de ili laŭeble longe. Post sia reveno hejmen li neniam denove parolis pri ĝi al iu ajn, krom Gandalfo kaj Frodo; kaj neniu alia en la Provinco sciis pri ĝia ekzisto, aŭ tion li supozis. Nur al Frodo li montris la priskribon de la vojaĝo, kiun li estis verkanta.

Sian glavon *Piko* Bilbo pendigis super sia kameno, kaj sian mirindan maŝkirason, donacon de la gnomoj el la Drak-amasigo, li pruntedonis al muzeo, fakte al la Madom-domo en Mult-Fosejo. Sed li konservis en tirkesto ĉe Bag-Endo la malnovan mantelon kaj kapuĉon, kiujn li vestis vojaĝante; kaj la ringo, ligita per delikata ĉeno, restis en lia poŝo.

Li revenis al sia hejmo ĉe Bag-Endo la 22an de junio en sia kvindek dua jaro (P. D. 1342), kaj nenio tre rimarkinda okazis en la Provinco ĝis s-ro Baginzo komencis preparojn por la festado de sia centdekunua naskiĝdatreveno. Je tiu punkto komenciĝas tiu ĉi Historio.

Noto pri la Provincaj analoj[3]

Je la fino de la Tria Epoko la rolo, kiun ludis la hobitoj en la grandaj eventoj, kiuj rezultigis, ke la Provinco estis inkluzivita en la Reunuiĝintan Reĝlandon, vekis ĉe ili pli vastan interesiĝon pri la propra historio, kaj multaj el iliaj tradicioj, ĝis tiam ankoraŭ ĉefe buŝaj, estis kolektitaj kaj surpaperigitaj. La pli eminentaj familioj okupiĝis ankaŭ pri okazaĵoj en aliaj partoj de la Reĝlando, kaj multaj el iliaj membroj studis ties antikvajn historiojn kaj legendojn. Ĉe la fino de la unua jarcento de la Kvara Epoko jam troviĝis en la Provinco pluraj bibliotekoj, kiuj enhavis multajn historiajn librojn kaj analojn.

La plej grandaj el tiuj kolektoj estis verŝajne ĉe Subturejo, ĉe Grandaj Smialoj, kaj ĉe Brandohalo. Tiu ĉi raporto pri la fino de la Tria Epoko estas ĉerpita precipe el la Ruĝa Libro de Okcidentejo. Tiun gravegan fonton pri la historio de la Milito de l' Ringo oni tiel nomis, ĉar ĝi estis longe gardata ĉe Subturejo, la hejmo de la Belinfanoj, Gardistoj de Okcidentejo[4]. Origine ĝi estis la privata taglibro de Bilbo, kiu kunportis ĝin al Rivendelo. Frodo reportis ĝin al la Provinco, kune kun multaj apartaj folioj kaj notoj, kaj en 1420-1 P.D. li preskaŭ plenigis ĝiajn paĝojn per sia raporto pri la Milito. Sed aldonitaj al ĝi, kaj konservitaj kune kun ĝi, verŝajne en unu ruĝa ujo, estis tiuj tri grandaj volumoj, binditaj en ruĝa ledo, kiujn Bilbo donis al li kiel adiaŭan donacon. Al tiuj kvar volumoj oni en Okcidentejo aldonis

kvinan volumon kun komentarioj, genealogioj, kaj diversaj aliaj aferoj pri la hobitaj membroj de la Kunularo.

La origina Ruĝa Libro ne estas konservita, sed oni faris multajn kopiojn, precipe de la unua volumo, por uzo de la posteuloj de la infanoj de Mastro Samsaĝo. La plej grava kopio tamen havas alian historion. Ĝi estis tenata en Grandaj Smialoj, sed ĝi estis skribita en Gondoro, verŝajne laŭ peto de la pranepo de Peregrino, kaj kompletigita en 1592 P.D. (172 de la Kvara Epoko). Ĝia sudana skribisto aldonis la jenan noton: Findegilo, Reĝa Skribisto, finis tiun ĉi verkon en IV 172. Ĝi estas ĉiudetale ekzakta kopio de la Superula libro de Minaso Tirit. Tiu libro estis kopio, farita laŭ peto de Reĝo Elesaro, de la Ruĝa libro de la Perianoj, kaj estis portita al li de Superulo Peregrino, kiam tiu emeritiĝinte transloĝiĝis al Gondoro en IV 64.

Sekve la Superula Libro estis la unua kopio farita de la Ruĝa Libro, kaj ĝi enhavis multon, kiu estis poste ellasita aŭ perdita. En Minaso Tirit ĝi ricevis abundon da notoj kaj korektoj, precipe pri nomoj, vortoj, kaj citaĵoj el la elfaj lingvoj; kaj oni aldonis al ĝi mallongigitan version de tiuj partoj de la *Rakonto pri Aragorno kaj Arvena*, kiuj troviĝas ekster la raporto pri la Milito. Laŭdire la plena rakonto estis verkita de Barahiro, nepo de reganto Faramiro, kelkan tempon post la forpaso de la Reĝo. Sed la ĉefa graveco de la Findegila kopio estas, ke ĝi sola enhavas la tuton de la "Tradukoj el la elfa" fare de Bilbo. Tiuj tri volumoj estis rigardataj kiel verko de grandaj lerto kaj instruiteco, en kiu, inter 1403 kaj 1418, li uzis ĉiujn fontojn haveblajn al li en Rivendelo, kaj vivantajn kaj skribitajn. Sed ĉar ili estis malmulte uzataj de Frodo, koncernante preskaŭ senescepte la Antikvajn Tagojn, ni pri ili ne parolos plu ĉi tie.

Pro tio, ke Gajadoko kaj Peregrino fariĝis ĉefoj de siaj grandaj familioj, kaj samtempe flegis siajn kontaktojn kun Rohano kaj Gondoro, la bibliotekoj ĉe Bokelboro kaj Tjukboro entenis multon, kiu ne aperas en la Ruĝa Libro. En Brandohalo troviĝis multaj verkoj, kiuj traktis pri Eriadoro kaj la historio de Rohano. Kelkaj el tiuj estis verkitaj aŭ komencitaj de Gajadoko mem, kvankam en la Provinco oni memoris lin precipe pro lia *Herbokonoj de la Provinco* kaj pro lia *Jarkalkulo*, en kiu li diskutas la rilaton de la Provinca kaj Bria kalendaroj al tiuj de Rivendelo, Gondoro, kaj Rohano. Krome li verkis mallongan traktaĵon *Malnovaj Vortoj kaj Nomoj en la Provinco*, ĉar li aparte interesiĝis pri la parenceco kun la lingvo de la rohananoj de tiaj "provincvortoj" kiel *madomo* kaj malnovaj elementoj de loknomoj.

En Grandaj Smialoj la libroj estis malpli interesaj al provincanoj, kvankam tre gravaj por pli ĝenerala historio. Neniu el ili estis verkita de Peregrino, sed li kaj liaj posteuloj kolektis multajn manuskriptojn faritajn de

gondoraj skribistoj: precipe kopiojn aŭ resumojn de historioj aŭ legendoj kun rilato al Elendilo kaj liaj heredintoj. Sole ĉi tie en la Provinco estis troveblaj ampleksaj materialoj por la historio de Numenoro kaj la supreniĝo de Saŭrono. Verŝajne en Grandaj Smialoj estis kompilita la *Rakonto de Jaroj*[5], helpe de materialo kolektita de Gajadoko. Kvankam la donitaj datoj ofte estas konjektoj, precipe por la Dua Epoko, ili meritas atenton. Estas verŝajne, ke Gajadoko akiris helpon kaj informojn en Rivendelo, kiun li vizitis pli ol unufoje. Tie, kvankam Elrondo estis foririnta, restis longe liaj filoj, kune kun kelkaj el la altelfa popolo. Oni diras, ke Celeborno iris por ekloĝi tie post la foriro de Galadriela, sed ne registriĝis informo pri la tago, kiam li fine sin turnis al la Grizaj Havenoj, kaj kun li foriris la lasta vivanta memoro de la Antikvaj Tagoj de Mez-Tero.

LA UNUA LIBRO



1. Malnova Arbaro

2. Bokelboro
3. Brando-Halo
4. Bokelbora Pramo
5. Brandovina Ponto

1

Longe atendita festo

Kiam s-ro Bilbo Baginzo el Bag-Endo anoncis, ke li baldaŭ festos sian dekunu-unuan naskiĝdaton per festo aparte impona, okazis multe da babilado kaj ekscitiĝo en Hobiturbo.

Bilbo estis tre riĉa kaj tre stranga, kaj estis la mirindaĵo de la Provinco dum sesdek jaroj, depost lia rimarkinda malapero kaj neatendita reveno. La riĉaĵoj reportitaj de li el la vojaĝado jam fariĝis loka legendo, kaj oni ĝenerale opiniis, kion ajn diru la maljunuloj, ke la Monteto de Bag-Endo plenplenis je tuneloj farĉitaj de trezoraĵo. Kaj se tio ne sufiĉis por famigi lin, oni povis miri ankaŭ pri lia longedaŭra vigleco. La tempo pasis, sed ŝajne ĝi malmulte modifis s-ron Baginzo. Naŭdekjara li pli-malpli samis kiel kvindekjara. Naŭdek-naŭjaran oni komencis nomi lin *bone* konservita, sed neŝanĝita estintus pli trafa. Troviĝis iuj, kiuj skuis sian kapon kaj opiniis, ke tio estas troabundo; ŝajnis maljuste, ke iu posedu (verŝajne) eternan junecon samtempe kun Gaŭdire) neelĉerpebla riĉaĵo.

— Tio estas pagota, — oni diris. — Estas nenature, kaj sekvos ĝenegoj pro tio!

Sed ĝis nun la ĝenegoj ne alvenis, kaj pro tio, ke s-ro Baginzo estis malavara pri sia mono, la plimultaj personoj volonte pardonis al li liajn strangaĵojn kaj lian feliĉan sorton. Li ankoraŭ vizitadis siajn parencojn (escepte, kompreneble, Retikul-Baginzojn), kaj li havis multajn dediĉitajn admirantojn inter hobitoj en malriĉaj kaj negravaj familioj. Sed li malhavis intimajn amikojn, ĝis kelkaj el liaj pli junaj kuzoj komencis adoltiĝi.

La plej aĝa el tiuj, kaj la plej ŝatata de Bilbo, estis juna Frodo Baginzo. Kiam Bilbo iĝis naŭdek-naŭjara, li adoptis Frodon kiel sian heredonton kaj loĝigis lin en Bag-Endo; kaj la esperoj de Retikul-Baginzoj definitive fiaskis. Bilbo kaj Frodo hazarde havis la saman naskiĝdaton, la 22an de septembro. “Vi prefere venu loĝi ĉi tie, Frodo, junulo, — diris iun tagon Bilbo, — kaj tiam ni povos komforte festi kune nian naskiĝdaton”. Tiutempe Frodo estis ankoraŭ en sia *intero*, kiel la hobitoj nomas la senrespondecajn dudekajn jarojn inter la infanaĝo kaj la adoltiĝo je tridek tri.

Pasis dek du pluaj jaroj. Ĉiujare la Baginzoj okazigis en Bag-Endo tre viglan kunigitan naskiĝfeston; sed nun estis komprenite, ke io vere elstara

estas planata por tiu aŭtuno. Bilbo estiĝos *dekunu-unua*, 111, cifero iom interesa, kaj tre respektinda aĝo de hobito (ĉar Maljuna Tjuko mem atingis nur 130); kaj Frodo estiĝos *tridek tri*, 33, grava cifero: la dato de lia "adoltiĝo".

Langoj komencis klaki en Hobiturbo kaj Apudakvo; kaj onidiroj pri la okazontaĵo disvastiĝis tra la tuta Provinco. La historio kaj karaktero de s-ro Bilbo Baginzo fariĝis denove la ĉefa konversacia temo; kaj la gemaljunuloj subite trovis, ke iliaj rememoroj estas tre bonvenaj.

Neniun oni pli atente aŭskultis ol la maljunan Ham Vato, konatan ĝenerale kiel la Avulo. Li paroladis ĉe *L' Arbusto Hedera*, taverneto sur la Apudakva vojo; kaj li parolis iom aŭtoritate, ĉar li prizorgis la ĝardenon ĉe Bag-Endo dum kvardek jaroj, helpis maljunan Holmanon en tiu sama posteno pli frue. Nun, kiam li mem estiĝis maljuna kaj iom rigidartika, la laboron plejparte plenumis lia plej juna filo Sam Vato. La patro kaj filo ambaŭ tre amike interrilatis kun Bilbo kaj Frodo. Ili loĝis sur la Monteto mem, en Numero 3 de Bagŝuta Vico, malsupre de Bag-Endo.

— Tre agrabla rafinita ĝentilhobito estas s-ro Bilbo, kiel mi ĉiam diris, — la Avulo deklaris. Tute vere, ĉar Bilbo ĉiam tre ĝentilumis al li, nomante lin Majstro Hamfasto, kaj konstante konsultante lin pri la kreskigo de legomoj — kiam temis pri "radikoj", precipe terpomoj, la Avulo estis rekonata de ĉiuj en la najbaraĵo (inkluzive de li mem) kiel la ĉefa aŭtoritato.

— Sed kio pri tiu Frodo, kiu loĝas ĉe li? — demandis Maljuna Nokso de Apudakvo. — Baginzo estas lia nomo, sed li estas pli ol duone Brandoboko, oni diras. Mi ne komprenas, kial iu ajn Baginzo de Hobiturbo serĉis edzinon tie malproksime en Boklando, kie la uloj estas tiel nenormalaj.

— Kaj ne mirinde, ke ili nenormalas, — enŝovis Paĉjo Dupiedo (najbaro de l' Avulo), — dum ili vivas malĝustaborde de l' Rivero Brandovino, precize kontraŭ la Malnova Arbarego. Tio estas loko malhela kaj malbona, se duono de la rakontoj veras.

— Vi pravas, Paĉjo, — diris la Avulo. — Brandobokoj fakte ne loĝas *en* la Malnova Arbarego; sed ili estas nenormala popolo, ŝajnas. Ili klaŭnadas per boatoj sur tiu granda rivero — kaj tio ne estas natura. Ne tre mirinde, ke devenis el tio ĝenoj, laŭ mi. Ĉu tiel aŭ ne, s-ro Frodo estas tiel agrabla juna hobito, kiel oni volus renkonti. Tre simila al s-ro Bilbo, kaj ne nur laŭaspekte. Finfine, lia patro Baginzis. Deca, respektinda hobito estis s-ro Drogo Baginzo; ne multe klaĉindis, ĝis li dronis.

— Dronis? — diris pluraj voĉoj. Ili jam pli frue aŭdis tiun kaj aliajn pli malhelajn onidirojn, kompreneble; sed hobitoj amegas familiajn historiojn, kaj ili pretis ĝin aŭdi denove.

— Nu, tiel oni diras, — diris la Avulo. — Vidu: s-ro Drogo edzinigis

kompatindan f-inon Primola Brandoboko. Ŝi estis kuzino de nia s-ro Bilbo flanke de l' patrino (ŝia patrino estis la plej juna el la filinoj de Maljuna Tjuko); kaj s-ro Drogo estis lia duagrada kuzo. Do s-ro Frodo estas lia nevo unuagrada *kaj* duagrada, je unu forŝtupo ambaŭflanke, kiel oni diras, se vi komprenas min. Kaj s-ro Drogo loĝis en Brando-Halo ĉe sia bopatro, maljuna Mastro Gorbadoko, kion li ofte faris post sia geedziĝo (ĉar li frandis manĝaĵojn, kaj maljuna Gorbadoko servigis al si en grandaj kvantoj); kaj li iris *boate* sur la Brandovina Rivero; kaj li kaj la edzino dronis, kaj kompatinda s-ro Frodo estis nur infano, finfine.

— Mi aŭdis, ke ili suriris la akvon en la lunlumo post vespermanĝo, — diris Maljuna Nokso, — kaj la pezo de Drogo subakvigis la boaton.

— Kaj aŭdis *mi*, ke ŝi puŝis lin, kaj li trenis ŝin post si, — diris Sablomano, la muelisto de Hobiturbo.

— Vi ne devus ripeti ĉion aŭdatan, Sablomano, — diris la Avulo, kiu ne tre ŝatis la mueliston. — Ne konvenas paroli pri puŝo kaj treno. Boatoj jam sufiĉe danĝeras al tiuj, kiuj sidas senmove, sen plia serĉado por la kaŭzo de akcidento. Ĉiuokaze: jen tiu s-ro Frodo restis orfigita kaj senrimeda, kiel oni povas diri, inter tiuj nenormalaj boklandanoj, edukata sensisteme en Brando-Halo. Vera kuniklejo, laŭ la raportoj. Maljuna Mastro Gorbadoko neniam havis malpli ol ducenton da parencoj en la loko. S-ro Bilbo neniam agis pli bonkore, ol kiam li revenigis la knabon por vivi inter decaj personoj.

— Sed laŭ mia opinio tio estis malagrabla bato al tiuj Retikul-Baginzoj. Ili supozis, ke ili ricevos Bag-Endon, tiutempe, kiam li foriris kaj oni supozis lin morta. Kaj poste li revenas kaj ordonas, ke ili foriru; kaj li daŭre vivas, vivadas, kaj neniam aspektas pli aĝa je unu tago, benon al li! Kaj subite li aperigas heredonton, kaj aranĝas korekte pri la dokumentoj. La Retikul-Baginzoj jam neniam vidos la internon de Bag-Endo, aŭ tion ni esperu.

— Konsiderinda monsumo estas tie forfaldita, mi aŭdis, — diris fremdulo, vizitanto priafera el Mult-Fosejo en la Okcidenta Kvarono. — La tuta supro de via monteto estas plena je tuneloj ŝtopitaj de kestoj da oro kaj arĝento, *kaj* juveloj, laŭ la famo.

— Do vi aŭdis pli, ol mi povas atesti, — respondis la Avulo. — Pri *juveloj* mi scias nenion. S-ro Bilbo malavaras pri sia mono, kaj ŝajne ĝi neniel mankas; sed mi scias nenion pri tunelfosado. Mi vidis s-ron Bilbo kiam li revenis, pli-malpli antaŭ sesdek jaroj, kiam mi estis knabo. Ne longe mi estis metilernanto de maljuna Holmano (li estis kuzo de mia paĉjo), sed li venigis min al Bag-Endo por kunlabori malhelpante, ke oni tretadu kaj vagadu en la tuta ĝardeno dum okazis la vendo. Kaj meze de ĉio ĉi s-ro Bilbo venas supren laŭ la Monteto kun poneo kaj kelkaj sakegoj kaj duo da

kestoj. Mi ne dubas, ke ili plejparte estis plenaj je trezoro akirita en fremdaj lokoj, kie troviĝas montoj da oro, oni diras; sed ne estis sufiĉe por plenigi tunelojn. Sed mia filo Sam certe scias pli pri tio. Li konstante eniras-eliras Bag-Endon. Fervorega pri rakontoj el la malnova tempo li estas, kaj li aŭskultas ĉiujn historiojn de s-ro Bilbo. S~ro Bilbo instruis al li la skribarton — sen misa intenco, vidu, kaj mi esperas, ke ne sekvos el tio misaĵoj.

"Elfoj kaj Drakoj! — mi diras al li. — Pli konvenas al vi kaj mi brasikoj kaj terpomoj. Ne enmiksiĝu en la aferojn de niaj superuloj, aŭ vi troviĝos en kaĉo tro varmega", — mi diras al li. Kaj tion mi povus diri ankaŭ al aliaj, — li aldonis, ekrigardante al la fremdulo kaj la muelisto.

Sed la Avulo ne konvinkis sian aŭdantaron. La legendo pri la riĉaĵoj de Bilbo estis jam tro firme fiksita en la mensoj de la pli juna hobitgeneracio.

— Ha, li verŝajne aldonadis al tio, kion li unue revenigis, — argumentis la muelisto, voĉigante komunan opinion. — Li ofte forestas de la hejmo. Kaj vidu la fremdulojn, kiuj vizitas lin: gnomoj, kiuj venas nokte, kaj tiu maljuna vagabonda prestidigitisto Gandalfo, kaj ĉiuj. Diru laŭplaĉe, Avulo, sed Bag-Endo estas loko nenormala, kaj ĝiaj uloj estas pli nenormalaj.

— Kaj diru *vi* laŭplaĉe, pri kio vi ne scias pli, ol vi scias pri boatoj, s-ro Sablomano, — ripostis la Avulo, eĉ pli ol kutime malŝatante la mueliston. — Se tio signifas esti nenormala, utilus iom pli da nenormaleco en tiu ĉi regiono. Troviĝas kelkaj ne malproksime, kiuj ne proponus glason da biero al amiko, se ili vivus en truo havanta orajn murojn. Sed oni agas malavare ĉe Bag-Endo. Nia Sam diras, ke *ĉiuj* estos invititaj al la festo, kaj estos donacoj, vidu, donacoj por ĉiuj — en tiu ĉi monato nuna.

Tiu monato nuna estis septembro, kaj nesupereble belvetera. Unu-du tagojn poste onidiro (probable lanĉita de la scioplena Sam) estis disvastigita, ke estos artfajraĵoj — artfajraĵoj, kiaj ne estis viditaj en la Provinco jam dum preskaŭ jarcento, depost la morto de l' Maljuna Tjuko.

Pasis la tempo kaj La Tago pliproksimiĝis. Kuriozaspekta furgono ŝarĝita je kuriozaspektaj pakaĵoj ruliĝis en Hobiturbon iun vesperon kaj pene rampis la Monteton ĝis Bag-Endo. La surprizitaj hobitoj trarigardadis lamplumitajn pordojn por ĝin primiri. Ĝin veturigis fremduloj, kantante strangajn kantojn: gnomoj kun longaj barboj kaj ampleksaj kapuĉoj. Kelkaj el ili restis ĉe Bag-Endo. Fine de la dua septembra semajno alvenis tra Apudakvo el la direkto de Ponto Brandovino en plena taglumo furgono. Maljunulo sola ĝin veturigis. Li vestis altan pintforman bluan ĉapelon, longan grizan mantelon, kaj arĝentan skarpon. Li havis longan blankan barbon kaj brovojn vilajn, kiuj elstaris preter la randaĵo de lia ĉapelo. Etaj hobitidoj postkuris tiun furgonon tra la tuta Hobiturbo kaj ĝis la supro de la

monteto. Ĝi enhavis kargon da artfajraĵoj, kiel ili trafe konjektis. Ĉe l' antaŭpordo de Bilbo la maljunulo komencis malŝarĝi: troviĝis grandaj faskoj da artfajraĵoj ĉiuspecaj kaj ĉiuformaj, unuope etikeditaj per granda ruĝa

ᛋ

kaj la elf-runo

ᚠ

.

Tio estis la marko de Gandalfo, la sorĉisto, kies konateco en la Provinco ŝuldiĝis ĉefe al lia lerteco pri fajroj, fumoj kaj lumoj. Lia reala okupiĝo estis multe pli malfacila kaj danĝera, sed la provincanoj nenion sciis pri tio. Por ili li estis nur unu el la "allogaĵoj" ĉe la Festo. Pro tio la ekscitiĝo de la hobitidoj. "G por Grandioza!" — ili kriis, kaj la maljunulo ridetis. Ili konis lin laŭaspekte, kvankam li nur de tempo al tempo vidiĝis en Hobiturbo kaj neniam restis longe; sed nek ili nek iu alia krom la plej aĝaj maljunuloj iam vidis unu el liaj elmontroj de artfajraĵoj — tiuj jam apartenis al legenda pasinteco.

Kiam la maljunulo, helpate de Bilbo kaj kelkaj gnomoj, finis malŝargi, Bilbo disdonis kelkajn pencojn; sed eĉ unu kolor- aŭ krakfajraĵo ne rezultiĝis, je la seniluziiĝo de la alrigardantoj.

— Kuru for jam! — diris Gandalfo. — Vi ricevos kontentige je la ĝusta tempo. — Poste li malaperis internen kun Bilbo, kaj la pordo estis fermita. La hobitidoj vane rigardadis la pordon dum kelka tempo, kaj poste foriris, sentante, ke neniam venos la tago de la festo.

Interne de Bag-Endo, Bilbo kaj Gandalfo sidis antaŭ malfermita fenestro de ĉambreto frontanta okcidenten al la ĝardeno. La malfrua posttagmezo helis kaj trankvilis. La floroj ardis ruĝe kaj ore: antirinoj kaj heliantoj, kaj tropeoloj dissterniĝintaj ĉien sur la torfaj muroj kaj engvatantaj ĉe la rondaj fenestroj.

— Kiel bunta aspektas via ĝardeno! — diris Gandalfo.

— Jes, — diris Bilbo. — Mi vere amas ĝin, kaj la tutan karan Provincjon; sed al mi ŝajnas, ke ferio necesas al mi.

— Vi intencas realigi vian planon, do?

— Efektive. Mi definitive decidiĝis antaŭ pluraj monatoj, kaj tion mi ne ŝanĝis.

— Tre bone. Senutilas diri pluon. Fidelu al via plano — al via tuta plano, nepre — kaj mi esperas, ke tio pruviĝos la plej bona por vi kaj por ni ĉiuj.

— Espereble. Ĉiuokaze mi intencas plezuri ĵaŭdon, kaj okazigi mian

etan amuzaĵon.

— Kiu ridos, mi scivolas? — diris Gandalfo, skuante sian kapon.

— Ni vidos, — diris Bilbo.

La postan tagon pliaj furgonoj alruliĝis supren laŭ la Monteto, kaj ankoraŭ pliaj furgonoj. Eble aŭdiĝis iom da grumblado pri "loka komercado", sed en tiu sama semajno komencis elverŝiĝi el Bag-Endo mendoj por ĉiaj proviantoj, produktaĵoj aŭ luksaĵoj, havigeblaj en Hobiturbo aŭ Apudakvo aŭ ie ajn en la najbaraĵo. La hobitoj entuziasmiĝis; kaj ili komencis forstreki la tagojn sur kalendaroj; kaj ili senpacience atendis la poŝtalvenon, esperante ricevi invitojn.

Postnelonge la invitoj komencis disverŝiĝi, kaj la hobiturba poŝtoficejo estis plenŝtopita, kaj la apudakva poŝtoficejo estis inundita, kaj oni alvokis volontulajn poŝthelpantojn. Konstanta sinsekvo da ili supreniris laŭ la Monteto, portante centojn da ĝentilaj variacioj de *Dankon, mi certe venos*.

Aperis avizo sur la enirejo de Bag-Endo: ENIRO MALPERMESATA KROM FESTRILATE. Eĉ al tiuj, kiuj havis aŭ pretekstis havi festrilaton, estis malofte permesate eniri. Bilbo estis okupata skribante invitojn, registrante respondojn, volvante donacojn, kaj prizorgante kelkajn proprajn privatajn preparojn. Ekde la alveno de Gandalfo li restis kaŝita kaj nevidebla.

Iun matenon la hobitoj vekiĝis kaj trovis, ke la granda kampo, sude de l' antaŭpordo de Bilbo, estas plenkovrita de ŝnuroj kaj stangoj por tendoj kaj pavilonoj. Speciala enirejo estis fosita en la taluso, kondukanta al la vojo, kaj tie estis konstruitaj larĝaj ŝtupoj kaj granda blanka pordo. La tri hobitfamilioj en Bagŝuta Vico, apud la kampo, estis ege interesitaj kaj ĝenerale enviataj. Maljuna Majstro Vato ĉesis eĉ ŝajnigi laboradon en sia ĝardeno.

La tendoj komencis muntiĝi. Troviĝis aparte granda pavilono, tiel enorma, ke la arbo kreskanta sur la kampo estis tute interne de ĝi, kaj staris fiere proksime al unu ekstremo, malantaŭ la ĉefa tablo. Lanternoj estis pendigitaj sur ĉiuj ĝiaj branĉoj. Eĉ pli promesoplene (laŭ hobita vidpunkto), grandega subĉiela kuirejo estis konstruita en la norda angulo de la kampo. Taĉmento de kuiristoj, el ĉiu taverno kaj manĝejo en plurmejla ĉirkaŭaĵo, alvenis por suplementi la gnomojn kaj aliajn strangulojn loĝigitajn en Bag-Endo. Ekscitiĝo atingis zeniton.

Tiam nubiĝis la vetero. Tio okazis merkredon, la antaŭvesperon de la Festo. Maltrankvilo estis premega. Poste efektive tagiĝis ĵaŭdo, la 22a de septembro.. La suno leviĝis, malaperis la nuboj, flagoj estis hisitaj, kaj komenciĝis la amuzoj.

Bilbo Baginzo nomis tion *festo*, sed ĝi estis fakte unuigita vario da

distraĵoj. Preskaŭ ĉiuj proksime loĝantoj estis invititaj. Tre malmultaj estis hazarde preteratentitaj, sed pro tio, ke ili ĉiuokaze alvenis, tio ne gravis. Multaj personoj el aliaj regionoj de la Provinco ankaŭ estis invititaj; kaj troviĝis eĉ kelkaj el trans la landlimo. Bilbo renkontis persone la gastojn (kaj kromulojn) ĉe la nova blanka pordo. Li faris donacojn al ĉiuj kaj la ceteraj — tiu lasta aludas tiujn, kiuj eliris laŭ malantaŭa vojo kaj denove eniris tra la pordo. Hobitoj faras donacojn al aliaj personoj okaze de l' propra naskiĝfesto. Ne tre multekostajn, kutime, kaj ne tiel superabunde, kiel en la aktuala okazo; sed tio estis sistemo ne tre malbona. Efektive, en Hobiturbo kaj Apudakvo ĉiu tago en la jaro estis ies naskiĝfesto, tiel ke ĉiu hobito en tiu regiono havis probablecon ricevi donacon almenaŭ unufoje en ĉiu semajno. Sed ili neniam tediĝis pri tio.

Je tiu ĉi okazo la donacoj estis neordinare bonkvalitaj. La hobitidoj estis tiel ekscititaj, ke ili preskaŭ forgesis pri manĝado. Troviĝis ludiloj tiaj, kiajn ili neniam antaŭe vidis, ĉiuj belaj, kaj iuj evidente magiaj. Multaj el ili ja estis menditaj jam antaŭ unu jaro, kaj venis de la Soleca Monto kaj el Valejo, kaj estis malfalse gnom-faritaj.

Kiam ĉiuj gastoj estis bonvenigitaj kaj troviĝis finfine interne de la pordo, okazis kantoj, dancoj, muziko, ludoj, kaj, kompreneble, manĝaĵoj kaj trinkaĵoj. Tri oficialaj manĝoj estis: tagmanĝo, temanĝo, kaj vespermanĝo (aŭ lastmanĝo). Sed tagmanĝon kaj temanĝon signis ĉefe la fakto, ke tiuokaze ĉiuj gastoj estis kunsidantaj kaj kunmanĝantaj. Aliokaze temis nur, ke multaj personoj manĝas kaj trinkas — daŭre de l' dek-unua ĝis la sesa kaj duono, kiam komenciĝis la artfajraĵoj.

Pri la artfajraĵoj respondecis Gandalfo: li ne nur alportis ilin, sed li planis kaj fabrikis ilin; kaj la specialaĵoj, koheraj bildoj, kaj flugigoj de raketoj estis funkciigitaj de li. Sed okazis ankaŭ malavara disdonado de petardoj, krakiloj, dissaltaĵoj, flagriloj, torĉoj, gnomaj kandeloj, elfaj fontoj, goblenaj bojiloj kaj tondraĵoj. Ĉiuj estis superbaj. La arto de Gandalfo pliboniĝis kun la tempopaso.

Vidiĝis raketoj similaj al aro da scintilaj birdoj kantantaj per dolĉaj voĉoj. Vidiĝis verdaj arboj kun trunkoj el malhela fumo: iliaj folioj malfermiĝis kiel tuta printempo momente malfaldiĝanta, kaj iliaj brilantaj branĉoj faligis ardajn florojn sur la mirigitajn hobitojn, kaj malaperis kun dolĉa parfumo ĝuste antaŭ ol tuŝi ties suprenturnitajn vizaĝojn. Vidiĝis fontoj da papilioj, kiuj flugis ekglimante en la arbojn; vidiĝis pilastroj da koloraj fajroj, kiuj leviĝis kaj iĝis agloj, aŭ velŝipoj, aŭ falango da flugantaj cignoj; vidiĝis ruĝa tondroŝtormo kaj ŝpruco da flava pluvo; vidiĝis arbarego da arĝentaj lancoj, kiuj saltis subite en la aeron kun kriego kvazaŭ de batalanta armeo, kaj malsupreniĝis denove en la riveron kun siblo kiel de

cent varmegaj serpentoj; Kaj vidiĝis ankaŭ unu lasta surprizo, honore al Bilbo, kaj ĝi tre timigis la hobitojn, kiel Gandalfo intencis. Estingiĝis la lumoj. Granda fumnubo leviĝis. Ĝi formis sin al monto de malproksime vidata, kaj komencis ardi ĉe la verto. Ĝi sputis verdajn kaj skarlatajn flamojn. Elflugis ruĝ-ora drako — ne laŭvive granda, sed terure vivsimila; el ties makzeloj venis fajro, ties okuloj rigardis kolere malsupren; aŭdiĝis blekego, kaj ĝi trifoje rapidpasis super la kapoj de la amaso. Ĉiuj ekkaŭris, kaj multaj falis vizaĝaltere. La drako preterpasis kiel rapidvagonaro, transkapiĝis, kaj krevis super Apudakvo kun surdiga eksplodo.

— Jen la signalo por vespermanĝo! — diris Bilbo. La doloro kaj timo tuj malaperis, kaj la kuŝantaj hobitoj salte leviĝis. Troviĝis admirinda vespermanĝo por ĉiuj; por ĉiuj, nome, krom la invititoj al la speciala familia festmanĝo. Tio okazis en la granda arbohava pavilono. La invitoj limiĝis al dek du dekduoj (nombro, kiun la hobitoj nomis ankaŭ unu Groco, kvankam oni juĝis nekonvene uzi tiun vorton pri personoj); kaj la gastoj estis elektitaj el ĉiuj familioj parencaj al Bilbo kaj Frodo, kune kun kelkaj apartaj neparencaj amikoj (kiel ekzemple Gandalfo). Inkluziviĝis multaj junaj hobitoj, kaj ĉeestis laŭ permeso de l' gepatroj; ĉar hobitoj traktis nerigore siajn infanojn rilate al malfrua enlitiĝo, precipe kiam ekzistis ebleco, ke ili manĝos senkoste. La edukado de hobitidoj postulis multe da nutraĵo.

Ĉeestis multaj Baginzoj kaj Bofinoj, kaj ankaŭ multaj Tjukoj kaj Brandobokoj; ĉeestis diversaj Gruboj (parencoj de l' avino de Bilbo Baginzo), kaj diversaj Ĉuboj (ligitaj al lia avo Tjuko); kaj elektaĵo de Subfosoj, Bolĝeroj, Bresgirdeloj, Brokhusoj, Bonkorpoj, Kornblovoj kaj Fierfutoj. Kelkaj el tiuj estis nur tre malproksimaj parencoj de Bilbo, kaj iuj preskaŭ neniam antaŭe vizitis Hobiturbon, ĉar ili loĝis en malproksimegaj anguloj de l' Provinco. La Retikul-Baginzoj ne estis preteratentitaj. Odo kaj ties edzino Lobelia ĉeestis. Ili malŝatis Bilbon kaj abomenis Frodon, sed tiel imponega estis la invitilo, skribita per ora inko, ke ili sentis neeble malakcepti. Krome, ilia kuzo, Bilbo, specialiĝis pri manĝaĵoj dum multaj jaroj kaj lia tabloprezentado ĝuis altan reputacion.

Ĉiuj cent kvardek kvar gastoj atendis agrablan festmanĝon, kvankam ili iom antaŭtimis la postmanĝan paroladon de sia gastiganto (eron neeviteblan). Li emis enŝovi pecojn da tio, kion ili nomis poezio; kaj foje, post unu-du glasoj, kutimis aludi tiujn absurdajn aventurojn de sia mistera vojaĝo. La gastoj ne desapontiĝis: ili ricevis *tre* agrablan festmanĝon, fakte atentokaptan distradon: riĉan, abundan, varian kaj longedaŭran. Aĉetado de nutraĵoj preskaŭ nuliĝis en la regiono dum la posta semajno; sed pro tio, ke la provizado de Bilbo reduktis la stokojn de l' plimultaj tenejoj, keloj kaj varejoj tra mejloj ĉirkaŭe, tio ne multe gravis.

Post la manĝado (pli-malpli) okazis la Parolado. La plejparto de la ĉeestantoj, tamen jam havis humoron tolereman, je tiu ŝatinda stadio, kiun ili nomis “plenigo de l’ anguloj”. Ili trinketis siajn plej ŝatatajn trinkaĵojn, kaj mordetis siajn plej ŝatatajn frandaĵojn, kaj iliaj antaŭtimoj estis forgesitaj. Ili pretis aŭskulti ion ajn, kaj hurai post ĉiu interpunkcia signo.

— Miaj karaj Personoj, — komencis Bilbo, stariĝante.

“Aŭdu! Aŭdu! Aŭdu!” — ili kriis, kaj ĥore ripetadis tion, ŝajne malemaj agi laŭ la propra konsilo. Bilbo forlasis sian lokon kaj iris stari sur seĝo sub la iluminita arbo. La lumo de la lanternoj trafis lian ridetantan vizaĝon; la oraj butonoj brilis sur lia brodita veŝto. Ĉiuj povis vidi, ke li staras rekta, svingante unu manon kaj ne eligante la alian el la poŝo.

— Miaj karaj Baginzoj kaj Bofinoj, — li rekomencis; — kaj miaj karaj Tjukoj kaj Brandobokoj, kaj Gruboj, kaj Ĉuboj, kaj Subfosoj, kaj Kornblovoj, kaj Bolĝeroj, Bresgirdeloj, Bonkorpoj, Brokhusoj kaj Fierfutoj.

— FierPIEDOJ! — kriis maljuneta hobito en la fono de la pavilono. Lia nomo, kompreneble, estis Fierfuto, kaj meritite; sed liaj piedoj estis grandaj, pli ol ordinare vilaj, kaj ambaŭ kuŝis sur la tablo.

— Fierfutoj, — ripetis Bilbo. — Ankaŭ miaj bonaj Retikul-Baginzoj, kies finfinan revenon al Bag-Endo mi bonvenigas. Hodiaŭ estas mia cent dek-unua naskiĝdatreveno: mi estas dekunu-unujara hodiaŭ!

— Hura! Hura! Vivu! — ili kriis, kaj ili ĝoje pugnobatis la tablojn. Bilbo rolis bonege. Tian materialon ili ŝatis: mallongan kaj memevidentan.

— Mi esperas, ke vi ĉiuj ĝuas la feston tiom, kiom mi. Surdigaj huraoj. Krioj de *Jes* (kaj *Ne*). Bruoj de trumpetoj kaj kornoj, fajfiloj kaj flutoj, kaj aliaj muzikaj instrumentoj. Ĉeestis, kiel dirite, multaj hobitoj junaj. Centoj da muzikaj krakiloj estis distiritaj. Multaj el tiuj surhavis la markon VALEJO; kio malmulton signifis al la plimultaj hobitoj, sed ĉiuj konsentis, ke tiuj estas mirindaj krakiloj. Ili enhavis instrumentojn, malgrandajn, sed perfekte fabrikitajn kaj sorĉtone sonantajn. Efektive, en unu angulo kelkaj el la junaj Tjukoj kaj Brandobokoj, supozante, ke Onklo Bilbo jam finis (ĉar klare li diris ĉion necesan), nun starigis ekstemporalan orkestron, kaj komencis gajan dancarion. Sinjoreto Everardo Tjuko kaj Fraŭlino Melilota Brandoboko surtabliĝis kaj kun sonoriloj en la manoj komencis danci la Printempo-rondon: dancon beletan, sed iom viglan.

Sed Bilbo ankoraŭ ne finis. Ekpreninte kornon de apuda junulo, li aŭdigis tri laŭtajn hupojn. La bruo malpliiĝis.

— Mi ne longe okupos vin, — li kriis. Huraoj el la tuta ĉeestantaro. — Mi kunvokis vin kun Celo. — Iel la maniero de lia elparolo faris impreson. Okazis preskaŭ silento, kaj unu-du el la Tjukoj ekatentis.

— Fakte, pro Tri Celoj! Unuavice, por diri al vi, ke mi treege ŝatas vin

ĉiujn, kaj ke dekunu-unu jaroj estas nesufiĉe longa tempo por vivi inter tiom da bonegaj kaj admirindaj hobitoj. — Granda eksplodo de aproboj.

— La duonon el vi mi ne konas duone tiom, kiom mi volus; kaj mi ŝatas malpli ol la duonon el vi duone tiom, kiom vi meritas. — Tio estis neatendita kaj iom malfacile komprenebla. Okazis iom da disa aplaŭdo, sedla plimulto el ili klopodis deĉifri ĝin por konstati, ĉu temis pri komplimento.

— Duavice, por festi mian naskiĝdatrevenon. — Denove huraoj. — Mi devus diri: NIAN naskiĝdatrevenon. Ĉar kompreneble hodiaŭ estas la naskiĝdatreveno ankaŭ de mia heredonto kaj nevo, Frodo. Hodiaŭ li adoltiĝas kaj ricevas sian heredaĵon.

Iom da sporada aplaŭdo far la maljunuloj; kaj kelkaj laŭtaj krioj: “Frodo! Frodo! Brava Froĉjo!” — de la junaj. La Retikul-Baginzoj malridetis, kaj scivolis, kion signifas “ricevas sian heredaĵon”.

— Kune ni sumiĝas je cent kvardek kvar jaroj. Via nombro estis elektita konvene al tiu rimarkinda sumo: Unu Groco, se licas uzi tiun esprimon.

Neniu hurao. Tio estis idiotaĵo. Multaj gastoj, kaj precipe la Retikul-Baginzoj, estis ofenditaj, certiĝante ke ili estis invititaj nur por kompletigi la postulitan nombron, kiel varoj en pakaĵo. “Unu Groco, ĉu? Esprimo triviala”.

— Hodiaŭ estas ankaŭ, se mi rajtas aludi antikvan historion, la datreveno de mia alveno perbarele al Esgarodo sur la Longa Lago; kvankam tiuokaze la fakto, ke temas pri mia naskiĝtago evitis mian memoron. Mi estis tiam nur kvindek-unujara kaj naskiĝdatrevenoj ne ŝajnis tiel gravaj. La bankedo estis vere luksa, tamen, kvankam mi tre malvarmumis tiutempe, mi toemoras, kaj kapablis diri nur “tre korad dadkod”. Tion mi nun ripetas pli korekte: Tre koran dankon pro tio, ke vi venis al mia eta festo.

Obstina silentado. Ĉiuj timis, ke estas tuj okazonta kanto aŭ iom da poezio; kaj ili komencis enuiĝi. Kial li ne volis ĉesigi la paroladon kaj permesi, ke ili tostu je lia sano? Sed Bilbo nek kantis nek deklamis. Li paŭzis momente.

— Trie kaj laste, — li diris, — mi volas fari anoncon. — Li elparolis tiel laŭte kaj subite tiun finan vorton, ke ĉiu, kiu ankoraŭ kapablis tion fari, rektiĝis. — Mi bedaŭras anonci, ke — kvankam, kiel mi diris, dekunu-unu jaroj estas nesufiĉe longa tempo por vivi inter vi — tio ĉi estas la FINO. Mi foriras. Mi forlasas vin NUN. Adiaŭ!

Li paŝis malsupren kaj malaperis. Vidiĝis blindiga ekbrilo da lumo, kaj ĉiuj gastoj palpebrumis. Kiam ili remalfermis siajn okulojn, Bilbo estis nenie videbla. Cent kvardek kvar miregigitaj hobitoj kliniĝis senparole malantaŭen. Maljuna Odo Fierfuto forigis siajn piedojn desur la tablo kaj

stamfis. Postsekvis morta silento, ĝis subite, post pluraj profundaj enspiroj, ĉiuj Baginzoj, Bofinoj, Tjukoj, Brandobokoj, Gruboj, Ĉuboj, Subfosoj, Bolĝeroj, Bresgirdeloj, Brokhusoj, Bonkorpoj, Kornblovoj kaj Fierfutoj ekparolis samtempe.

Estis ĝenerale konsentite, ke la ŝerco estis tre misgusta, kaj pli da manĝaĵoj kaj trinkaĵoj necesis por kuraci la ŝokiĝon kaj ĝeniĝon de la gastoj. “Li frenezas. Tion mi ĉiam asertis”, — estis verŝajne la plej ofta komento. Eĉ la Tjukoj (kun kelkaj esceptoj) opiniis absurda la agadon de Bilbo. Provizore la plimultaj el ili tute ne dubis, ke lia malapero estis nenio pli, ol idiota ŝerco.

Sed maljuna Rorio Brandoboko ne estis tiel certa. Nek lia aĝo nek grandega manĝo nebuligis al li la mensan viglon, kaj li diris al sia bofilino Esmeralda: “En tio ĉi troviĝas io suspektinda, mia kara! Al mi ŝajnas, ke tiu freneza Baginzo ekvojaĝas denove. Maljuna idioto. Sed kial senti ĝenon? Li ne kunportis la nutraĵon”. — Li vokis laŭte al Frodo, ke tiu cirkuligu ankoraŭfoje la vinon.

Frodo estis la sola ĉeestanto, kiu diris nenion. Dum kelka tempo li sidis silente apud la malplena seĝo de Bilbo, kaj ignoris ĉiujn komentojn kaj demandojn. Li ĝuis la ŝercon, kompreneble, malgraŭ tio, ke li antaŭsciis pri ĝi. Nur malfacile li bridis sian ridadon pro la kolereta surpriziĝo de la gastoj. Sed samtempe li estis funde zorgoplena: li subite konstatis, ke li kore amas la maljunan hobiton. La plimultaj gastoj daŭre manĝis kaj trinkis kaj diskutis la nenormalaĵojn, pasintajn kaj nuntempajn, de Bilbo Baginzo; sed la Retikul-Baginzoj jam foriris kolere. Frodo ne volis plu partopreni la feston. Li ordonis, ke estu servata pli da vino; poste li stariĝis kaj eltrinkis sian propran glason, silente je la sano de Bilbo, kaj forŝteliĝis el la pavilono.

Rilate Bilbon Baginzo, eĉ dum la parolado li fingrumis en sia poŝo la oran ringon, pri kiu li sekretis dum tiom da jaroj. Depaŝante li surfingrigis ĝin, kaj li neniam plu estis vidita de iu ajn hobito en Hobiturbo.

Li remarŝis vigle al sia truo kaj staris momente, ridete aŭskultante la bruon en la pavilono kaj la sonojn de gajeco en aliaj partoj de la kampo. Poste li eniris. Li demetis siajn festvestaĵojn, faldis kaj volvis per delikata papero sian broditan silkan veŝton kaj ĝin entirkestigis. Poste li vestis rapide kelkajn malnovajn malordajn vestaĵojn, kaj bukis ĉirkaŭ la talio ĉifitan ledan zonon. Al ĝi li pendigis mallongan glavon en taŭzita nigraleda ingo. El ŝlosita tirkesto, odoranta je kamforo, li elprenis malnovajn mantelon kaj kapuĉon. Ili estis forŝlositaj, kvazaŭ ili estus tre valoraj, tamen ili estis tiel flikitaj kaj vetermakulitaj, ke ilian originan koloron oni apenaŭ povus diveni: tio eble estis malhelverdo. Ili estis iom tro grandfasonaj por li. Tiam li eniris sian kabineton, kaj el kofrego elprenis bulon volvitan per malnovaj

ŝtofoj, kaj lede binditan manuskripton, kaj ankaŭ plenŝtopitan kovertegon. La libron kaj bulon li enŝovis en la supron de peza sako tie staranta, jam preskaŭ plena. En la kovertegon li metis sian oran ringon, kaj ties delikatan ĉenon, kaj poste ĝin glufermis kaj adresis al Frodo. Unue li metis ĝin sur la kamenbreton, sed subite li reprenis ĝin kaj ĝin enpoŝigis. Tiumomente la pordo malfermiĝis kaj Gandalfo rapide envenis.

— Saluton! — diris Bilbo. — Mi scivolis, ĉu vi aperos.

— Mi ĝojas trovi vin videbla, — respondis la sorĉisto, sidiĝante sur seĝon. — Mi volis trafi vin kaj interŝanĝi kelkajn lastajn vortojn. Supozeble vi sentas, ke ĉio plenumiĝis tre kontentige kaj laŭplane?

— Jes, tiel, — diris Bilbo, — kvankam tiu ekbrilo estis surpriza; ĝi vere eksaltigis min, se ne paroli pri l' aliaj. Eta aldonaĵo viaflanke, mi supozas?

— Ĝuste. Vi saĝe tenis sekreta tiun ringon dum tiel multaj jaroj, kaj ŝajnis al mi necese havigi al viaj gastoj ion alian, kio ŝajnus klarigi vian subitan malaperon.

— Kaj fuŝus mian ŝercon. Vi estas entrudiĝema maljuna ĝenulo, — ridis Bilbo, — sed mi supozas, ke vi scias plej bone, kion fari, kiel kutime.

— Tion mi scias — kiam mi scias ion ajn. Sed mi ne tute certas pri tiu ĉi afero. Ĝi jam atingis sian finan punkton. Vi ĝuis vian ŝercon, timigis aŭ ofendis la plimulton el viaj parencoj, kaj provizis al la Provinco paroltemon naŭtagan, aŭ pli probable naŭdek-naŭtagan. Ĉu vi intencas ion pli?

— Jes, fakte. Mi sentas bezonon ferii, tre longe ferii, kiel mi jam pli frue diris al vi. Probable permanente: mi ne atendas, ke mi revenos. Efektive, mi ne intencas reveni, kaj mi faris ĉiujn necesajn aranĝojn. Mi estas maljuna, Gandalfo. Tia mi ne aspektas, sed tia mi komencas senti min en mia plej intima memo. "Bone-konservita", ĉu vere! — li tranazis. — Eh, mi sentas min tute maldika, kvazaŭ *eltirita*, se vi scias, kion mi volas esprimi: kiel butero, kiun oni skrapis sur tro multe da pano. Tio ne povas esti ĝusta. Mi bezonas alternativon, aŭ ion.

Gandalfo rigardis lin scivoleme kaj intense.

— Ne, tio ne ŝajnas ĝusta, — li diris penseme. — Ne, finfine mi opinias, ke via plano probable estas plej bona.

— Nu, mi ĉiuokaze decidiĝis. Mi deziras vidi montojn denove, Gandalfo — *montojn*; kaj poste trovi lokon, kie mi povu *ripozi*. Trankvile kaj kviete, sen amaso da gvatantaj parencoj, sen sinsekvo de vizitantaĉoj pendantaj sur la sonorilo. Eble mi trovos lokon, kie mi povos finverki mian libron. Mi elpensis por ĝi tre taŭgan finon: *kaj ĉiam poste li vivis feliĉe ĝis la fino de siaj tagoj*.

Gandalfo ridis.

— Mi esperas, ke li tion faros. Sed legos la libron neniu, negrave kiel ĝi

finiĝos.

— Ho, eble oni legos, en venontaj jaroj. Frodo jam legis iom, ĝis tie, kien ĝi alvenis. Vi okulumos al Frodo, ĉu ne?

— Jes, nepre — duokulumos, tiel ofte, kiel eblos al mi.

— Li akompanus min, kompreneble, se mi tion petus. Fakte, li unufoje proponis tion, tuj antaŭ la festo. Sed tion li ne vere volas, nuntempe. Mi deziras revidi la sovaĝejon antaŭ ol morti, kaj la montaron; sed li ankoraŭ enamiĝis al la Provinco, al arbaroj kaj kampoj kaj etaj riveroj. Li devus senti sin komforta ĉi tie. Mi lasas ĉion al li, kompreneble, krom kelkaj bagatelaĵoj. Mi esperas, ke li estos feliĉa, kiam li kutimiĝos vivi sola. Estas jam tempo, ke li estu la propra mastro.

— Ĉion? — diris Gandalfo. — Ankaŭ la ringon? Vi konsentis pri tio, memoru.

— Nu...mm...jes, supozeble, — balbutis Bilbo.

— Kie ĝi estas?

— En koverto, se vi devas scii, — diris Bilbo senpacience. — Tie, sur la kamenbreto. Nu, ne! Jen ĝi en mia poŝo! — Li hezitis. — Ĉu ne strange? — Li diris mallaŭte al si. — Jes, finfine, kial ne? Kial ĝi ne restu tie?

Gandalfo denove rigardis intense Bilbon, kaj en liaj okuloj vidiĝis ekbrilo.

— Al mi ŝajnas, Bilbo, — li diris kviete, — pli bone postlasi ĝin. Ĉu vi ne volas?

— Nu jes — kaj ne. Nun, kiam venis la momento, al mi ne plaĉas disiĝi de ĝi, necesas diri. Kaj mi vere ne komprenas, kial tio necesu. Kial vi deziras tion? — li demandis, kaj strange ŝanĝiĝis lia voĉo. Ĝi estis akra pro suspektemo kaj kolereto. — Vi ĉiam turmentas min pri mia ringo; sed vi neniam ĝenis min pri la ceteraj aĵoj, kiujn mi akiris dum mia vojaĝo.

— Ne, sed mi devis turmenti vin, — diris Gandalfo. — Mi deziris la veron. Tio estis grava. Magiaj ringoj estas — nu, magiaj; kaj ili estas raraj kaj strangaj. Mi interesiĝis profesie pri via ringo, vi povas diri; kaj mi daŭre interesiĝas. Mi ŝatus scii, kie ĝi estas, se vi denove ekvagados. Mi krome pensas, ke *vi* jam posedas ĝin sufiĉe longe. Vi ne plu bezonos ĝin, Bilbo, krom se mi tre eraras.

Bilbo ruĝiĝis, kaj en liaj okuloj estis kolera lumo. Lia bonkora vizaĝo malmoliĝis.

— Kial ne? — li kriis. — Kaj cetere, kiel tio vin koncernas, kiel mi disponigas miajn proprajn posedaĵojn? Ĝi estas mia. Mi ja trovis ĝin. Ĝi alvenis min.

— Jes, jes, — diris Gandalfo. — Sed ne necesas koleriĝi.

— Se mi koleriĝas, pri tio kulpas vi, — diris Bilbo. — Ĝi apartenas al

mi, mi asertas. Mia propra. Mia trezorego. Jes, mia trezorego.

La vizaĝo de l' sorĉisto restis seriozmiena kaj atentema, kaj nur ekflagro en liaj profundaj okuloj atestis, ke li estas surprizita kaj fakte timigita.

— Tiel nomis ĝin jam pli frue iu, — li diris, — sed ne vi.

— Sed mi tion diras nun. Kaj kial ne? Eĉ se Golumo iam diris la samon. Ĝi ne plu estas lia, sed mia. Kaj mi konservos ĝin, mi diras.

Gandalfo stariĝis. Li parolis severe.

— Vi agos stulte, se vi tion faros, Bilbo, — li diris, — tion vi igas pli klara per ĉiu dirita vorto. Ĝi multe tro obsedas vin. Liberiĝu de ĝi! Kaj poste vi povos mem iri, kaj esti libera.

— Mi agos laŭ mia elekto, kaj iros laŭ mia plaĉo, — diris Bilbo obstine.

— Trankviliĝu, mia kara hobito! — diris Gandalfo. — Dum via tuta longa vivo ni estas amikoj, kaj vi ŝuldas al mi ion. Vidu! Faru laŭpromese; rezignu pri ĝi!

— Nu, se vi mem deziras mian ringon, diru tion! — kriis Bilbo. — Sed vi ne ricevos ĝin. Mi ne fordonos mian trezoregon. Mi diras tion al vi. — Lia mano vagis ĝis la tenilo de lia glaveto.

La okuloj de Gandalfo ekfulmis.

— Baldaŭ estos mia vico koleriĝi, — li diris. — Se vi tion diros denove, tio okazos. Tiam vi vidos Gandalfon la Grizan senmantelita. — Li faris unu paŝon al la hobito kaj li ŝajnis kreski alta kaj minaca; lia ombro plenigis la ĉambreton. Bilbo retropaŝis ĝis la muro, peze spirante, dum lia mano alkroĉiĝis al lia poŝo. Ili staris dum kelka tempo frontante unu alian, kaj la aero en la ĉambro elektris. La okuloj de Gandalfo restis turnitaj malsupren al la hobito. Malrapide ties manoj malstreĉiĝis, kaj li komencis tremi.

— Mi ne scias, kio okazis al vi, Gandalfo, — li diris. — Vi neniam antaŭe estis tia. Pri kio temas? Ĝi ja estas mia, ĉu ne? Mi ĝin trovis. Kaj Golumo estus mortiginta min, se mi ĝin ne retenintus. Mi ne estas ŝtelinto, kion ajn li diris.

— Mi neniam nomis vin ŝtelinto, — Gandalfo respondis. — Kaj ankaŭ mi ne estas tio. Mi ne klopodas prirabi vin, sed volas vin helpi. Mi volas, ke vi fi,du min, kiel vi kutimis antaŭe.

Li sin forturnis, kaj la ombro forpasis. Li ŝajnis ŝrumpi denove je maljuna grizulo, kurbiĝinta kaj zorgoplena. Bilbo pasigis sian manon trans la okulojn.

— Mi petas pardonon, — li diris. — Sed mi sentas min tiel stranga. Kaj tamen estus iasence malŝarĝiĝo, ne esti plu ĝenata pri ĝi. Lastatempe ĝi pli kaj pli okupis mian menson. Kelkfoje ĝi sentiĝis kvazaŭ okulo min rigardanta. Kaj mi senĉese volas ĝin surfingrigi kaj malaperi, ĉu vi komprenas; aŭ scivolas, ĉu ĝi estas sekura, kaj ĝin elpoŝigas por certiĝi pri

tio. Mi provis ĝin forŝlosi, sed mi trovis, ke mi ne povas esti trankvila, se ĝi ne estas en mia poŝo. Mi ne scias la kialon. Kaj ŝajne mi ne kapablas decidiĝi.

— Do fidu min, — diris Gandalfo. — Mi tute decidiĝis. Foriru kaj lasu ĝin malantaŭe. Ĉesu posedi ĝin. Donu ĝin al Frodo, kaj mi gardos lin.

Bilbo staris momente, streĉita kaj sendecida. Poste li suspiris.

— Bone, — li diris nefacile. — Mi tion faros. — Tiam li ŝultrotiris, kaj ridetis iom sinkompate. — Finfine, pri kio temis ĉi festafero, vere: fordoni multajn naskiĝdonacojn, kaj tiamaniere plifaciligi ĝian samtempan fordonon. En la fino ĝi tion ne plifaciligis, sed estus domaĝe malŝpari ĉiujn miajn preparojn. Tio tute fuŝus la ŝercon.

— Efektive, tio forigus la solan pravigon, kiun mi iam ajn rimarkis pri la afero, — diris Gandalfo.

— Tre bone, — diris Bilbo, — ĝi transiras al Frodo kun la cetero. — Li profunde enspiris. — Kaj nun mi nepre devas ekiri, aŭ iu alia trovos min. Mi jam adiaŭis, kaj mi ne tolerus refari tion.

Li levis sian sakon kaj moviĝis al la pordo.

— La ringo ankoraŭ troviĝas en via poŝo, — diris la sorĉisto.

— Nu, vere! — ekkriis Bilbo. — Kaj mia testamento kaj ĉiuj ceteraj dokumentoj. Prefere vi prenu ĝin kaj liveru ĝin mianome. Tiel estos plej sekure.

— Ne, la ringon ne donu al mi, — diris Gandalfo. — Metu ĝin sur la kamenbreton. Tie ĝi estos sufiĉe sekura, ĝis venos Frodo. Mi atendos lin.

Bilbo elprenis la kovertegon, sed ĝuste kiam li estis metonta ĝin apud la horloĝon, lia mano retrosaltis, kaj la pakaĵo falis sur la plankon. Antaŭ ol li povis repreni ĝin, la sorĉisto kliniĝis kaj ĝin kaptis kaj metis ĝin sur ĝian lokon. Kolerspasmo trapasis rapide la vizaĝon de l' hobito denove. Subite tion anstataŭis mieno de malŝarĝiĝo kaj rido.

— Nu, farite, — li diris. — Nun mi ekalas!

Ili iris en la vestiblon. Bilbo elektis sian plej ŝatatan bastonon el la tenujo; poste li fajfis. Tri gnomoj venis el diversaj ĉambroj, kie ili estis laborintaj.

— Ĉu ĉio preta? — demandis Bilbo. — Ĉio pakita kaj etikedita?

— Ĉio, — ili respondis.

— Nu, ni komencu do! — Li elpaŝis tra la antaŭpordo.

La nokto estis bela, kaj la nigran ĉielon trapunktis steloj. Li suprenrigardis, snufante la aeron.

— Kiel agrable! Kiel agrable denove ekiri laŭ la Vojo kun gnomoj! Jen pri kio mi vere sopiris, jam de jaroj! Adiaŭ! — li diris, rigardante sian antaŭan hejmon kaj riverencante al la pordo. — Adiaŭ, Gandalfo!

— Adiaŭ provizore, Bilbo. Prizorgu vin! Vi estas sufiĉe aĝa, kaj eble sufiĉe saĝa.

— Prizorgi! Mi ne zorgas. Ne ĝenu vin pri mi! Mi estas nun tiel feliĉa, kiel iam ajn, kaj tio estas grandakvante. Sed venis la tempo. Mi estas finfine trudpelata, — li aldonis, kaj poste per murmura voĉo, kvazaŭ al si mem, li kantis mallaŭte en la mallumo:

La Vojo ĉiam plu pilgrimas
ekde la pordo de l' komenco.
La Vojo jam tre malproksimas,
kaj mi ĝin sekvos, laŭ intenco,
per ritma viglo de l' paŝadoj,
ĝis en vojegon ĝi devias
ĉe l' renkontiĝ' de multaj padoj.
Kaj poste kien? Mi ne scias.

Li paŭzis, momente silenta. Tiam sen plua vorto li sin turnis for de la lumoj kaj voĉoj en la kampoj kaj tendoj, kaj sekvate de siaj tri kunuloj eniris sian ĝardenon, kaj malsuprentrotis laŭ la longa dekliva pado. Li transsaltis malaltan lokon en la heĝo ĉe la subo, kaj eniris la herbokampojn, forpasante en la nokton kiel ventsiblo en la razeno.

Gandalfo restis kelkan tempon, rigardante post li en la mallumon.

— Adiaŭ, kara mia Bilbo — ĝis nia venonta renkontiĝo! — li diris mallaŭte kaj reeniris la domon.

Baldaŭ post tio envenis Frodo, kaj trovis lin sidanta en mallumo, profunde pensanta.

— Ĉu li foriris? — li demandis.

— Jes, — respondis Gandalfo. — Li finfine foriris.

— Mi volus — tio estas, mi esperis ĝis ĉi-vespere, ke tio estu nura ŝerco, — diris Frodo. — Sed mi sciis en mia koro, ke li vere intencas iri. Li ĉiam kutimis ŝerci pri seriozaj aferoj. Mi volis reveni pli frue, nur por vidi lin ekiri.

— Ŝajnas al mi, vere, ke li preferis kviete forŝteliri en la fino, — diris Gandalfo. — Ne estu tro ĝenata. Al li estos bone — jam. Li postlasis por vi pakaĵon. Jen ĝi!

Frodo prenis la kovertegon desur la kamenbreto, kaj ekrigardis ĝin, sed ne malfermis.

— Vi trovos en ĝi lian testamenton kaj ĉiujn ceterajn dokumentojn, mi opinias, — diris la sorĉisto. — Vi mastras nun en Bag-Endo. Kaj krome, mi supozas, vi trovos la oran ringon.

— La ringon! — ekkriis Frodo. — Ĉu li postlasis tion al mi? Mi

scivolas, kial. Nu, ĝi eble utilos.

— Eble, eble ne, — diris Gandalfo. — Mi ne utiligus ĝin, se temus pri mi. Sed tenu ĝin sekreta, kaj tenu ĝin sekura! Nun mi iras dormi.

Kiel mastro de Bag-Endo, Frodo opiniis sia malĝoja devo adiaŭi la gastojn. Onidiroj pri strangaj okazintaĵoj jam disvastiĝis tra la tuta kampo, sed Frodo rifuzis diri ion, krom *sendube ĉio klariĝos matene*. Ĉirkaŭ noktomezo alvenis kaleŝoj por la gravuloj. Unu post unu ili forruliĝis, plenaj je sataj sed tre malkontentaj hobitoj. Ĝardenistoj venis laŭkontrakte kaj en puŝoĉaroj forigis tiujn, kiuj senintence postrestis.

Malrapide pasis la nokto. La suno leviĝis. La hobitoj leviĝis iom pli malfrue. Daŭris la mateno. Oni komencis (laŭmende) forigi la pavilonojn, tablojn, seĝojn, kulerojn kaj tranĉilojn, botelojn kaj pladojn, lanternojn, florarbustojn en ujoj, panerojn kaj krakilpaperon, forgesitajn mansakojn, gantojn, poŝtukojn kaj la nemanĝitan nutraĵon (eron tre malgrandan). Poste venis kvanto da aliaj uloj (senmende): Baginzoj kaj Bofinoj, kaj Bolĝeroj, kaj Tjukoj, kaj aliaj gastoj, kiuj loĝis aŭ tranoktis proksime. Je tagmezo, kiam eĉ la plejmanĝintoj denove funkciis, troviĝis granda amaso ĉe Bag-Endo, seninvita, sed ne neatendita.

Frodo atendis sur la sojlo, ridetanta, sed iom lac- kaj zorg-aspekta. Li bonvenigis ĉiujn vizitantojn, sed havis por diri ne multe pli ol antaŭe. Lia respondo al ĉiuj demandoj estis simple tio:

— S-ro Bilbo Baginzo foriris; laŭ mia scio, senrevene.

Kelkajn el la vizitantoj li invitis en la domon, ĉar Bilbo postlasis por ili mesaĝojn.

Interne, en la vestiblo, amasiĝis granda sortimento da pakaĵoj, pakaĵetoj kaj etaj mebloj. Al ĉiu ero estis ligita etikedo. Troviĝis pluraj etikedoj de jena speco:

Al Adelardo Tjuko, kiel PROPRA POSEDAĴO, de Bilbo; sur pluvombrelo. Adelardo estis forportinta multajn ombrelojn senetikedajn.

Al Dora BAGINZO memore pri longa korespondado, kun amo de Bilbo; sur granda paperkorbo. Dora estis fratino de Drogo kaj la plejaĝa vivanta parencino de Bilbo kaj Frodo; ŝi estis naŭdek-naŭ-jara, kaj skribis rismojn da bonaj konsiloj dum pli ol duonjarcento.

Al Milo Subfoso, esperante ke ĝi estos utila, de B. B.; sur oraj plumo kaj inkujo. Milo neniam respondis al leteroj.

Por uzado de ANĜELIKA, de Onklo Bilbo; sur ronda konveksa spegulo. Ŝi estis Baginzo juna, kaj tro evidente opiniis belforma sian vizaĝon.

Por la kolekto de HUGO Bresgirdelo, de kontribuinto; sur (malplena) librobretaro. Hugo estis fervora pruntepreneanto de libroj, kaj pli ol kutime nefidinda pri la redono.

Al Lobelia RETIKUL-BAGINZO, kiel DONACO; sur skatolo da kuleroj arĝentaj. Bilbo opiniis, ke ŝi akiris sufiĉe multnombre liajn kulerojn, dum li antaŭe vojaĝis. Lobelia tre bone sciis tion. Kiam ŝi alvenis pli malfrue dum la tago, ŝi tuj kaptis la nuancon, sed ankaŭ la kulerojn ŝi prenis.

Tio estas nur eta elektaĵo el la amasigitaj donacoj. La loĝejo de Bilbo iomete malordiĝis pro posedaĵoj dum lia longa vivo. Hobitotruoj tendencas malordiĝi: por kio grandparte respondecis la kutimo doni tiom da naskiĝfestaj donacoj. La naskiĝfestaj donacoj, kompreneble, ne ĉiam estis *novaj*; ekzistis unu-du malnovaj *madomoj*, kies utiligon oni ne plu memoris, kiuj ĉirkaŭiris la tutan distrikton; sed Bilbo kutimis doni donacojn novajn kaj reteni la ricevitajn. La malnova truo nun estis iomete ordigita.

Ĉiu el la diversaj disiĝdonacoj havis etikedon, persone skribitan de Bilbo, kaj pluraj estis trafaj aŭ ŝercaj. Sed kompreneble la plimultaj estis donacitaj tien, kie ili estus deziratajn kaj bonvenaj. La pli malriĉaj hobitoj, kaj precipe tiuj en Bagŝuta Vico, bone profitis. Maljuna Majstro Vato ricevis du sakojn da terpomoj, novan fosilon, lanan veŝton, kaj botelon da linimento por artikoj doloraj. Maljuna Rorio Brandoboko, kompense al multe da gastigado, ricevis dekduon da boteloj de Malnova Vinberejo: forta ruĝa vino el Sud-kvarono, kaj jam tute matura, ĉar ĝin enkeligis la patro de Bilbo. Rorio komplete pardonis Bilbon, kaj votis lin bonegulo post la unua botelo.

Restis al Frodo sufiĉe da ĉio. Kaj, kompreneble, ĉiuj ĉefaj valoraĵoj, kiel ankaŭ la libroj, pentraĵoj kaj pli ol sufiĉe da mebloj, restis lia posedaĵo. Troviĝis tamen neniu ekvido aŭ mencio pri mono aŭ juvelaro: eĉ unu monero aŭ vitra globeto ne estis fordonacita.

Frodo pasigis tre ĝenatan posttagmezon. Falsa onidiro, ke la tuta domenhavo estas senpage disdonata, disvastiĝis kiel fulmo; kaj postnelonge la loko estis plenŝtopita de uloj, kiuj havis neniun rajton tie, sed kiuj ne estis forbareblaj. Etikedoj estis detorditaj kaj miksitaj, kaj kvereloj eksplodis. Iuj klopodis aranĝi interŝanĝojn kaj komercadojn en la vestiblo; kaj aliaj provis forporti malgrandajn erojn al ili ne adresitajn, aŭ ion ajn, kiu ŝajnis nedezirata aŭ negardata. La vojon al la ĝardenpordo ŝtopis ĉarumoj kaj ĉaretoj.

Meze de la tumulto alvenis la Retikul-Baginzoj. Frodo provizore estis retiriĝinta kaj lasis sian amikon Gaja Brandoboko por kontroli la okazaĵojn. Kiam Odo laŭte postulis renkonti Frodon, Gaja riverencis ĝentile.

— Li fartas ne tute bone, — li diris. — Li ripozas.

— Sin kaŝas, diru prefere, — diris Lobelia. — Ĉiuokaze ni volas renkonti lin kaj intencas renkonti lin. Jam iru diri tion al li!

Gaja lasis ilin iom longe en la vestiblo, kaj ili havis sufiĉan tempon por trovi sian disiĝdonacon da kuleroj. Tio ne pliheligis ilian humoron. Finfine oni kondukis ilin en la kabineton. Frodo sidis ĉe tablo, kun multe da paperoj antaŭ si. Li aspektis misfarta — almenaŭ rilate al Retikul-Baginzoj; sed li stariĝis, fingrumante ion en la poŝo. Sed li parolis tute ĝentile.

La Retikul-Baginzoj estis iom ofendemaj. Ili komencis, proponante al li maltaŭgajn bonprezojn (kiel inter amikoj) por diversaj valoraj kaj neetikeditaj aĵoj. Kiam Frodo respondis, ke nur tiuj aĵoj speciale indikitaj de Bilbo estas fordonacataj, ili diris, ke la tuta afero estas suspektinda.

— Nur unu afero estas klara al mi, — diris Odo, — kaj tio estas, ke vi mem bele profitas el ĉio ĉi. Mi insistas rigardi la testamenton.

Odo estus la heredinto de Bilbo, se ne okazus la adopto de Frodo. Li tre zorge tralegis la testamenton kaj snufegis. Ĝi estis, bedaŭrinde, tre klara kaj korekta (laŭ la juraj moroj de hobitoj, kiuj postulas interalie sep subskribojn per ruĝa inko de atestantoj).

— Denove malhelpate! — li diris al sia edzino. — Kaj post *sesdek* jaroj da atendado. Ĉu kuleroj? Galimatio!

Li klakigis la fingrojn sub la nazo de Frodo kaj forstamfis. Sed oni ne liberiĝis tiel facile de Lobelia. Iom poste Frodo elvenis el la kabineto por kontroli, kiel progresas la aferoj, kaj trovis ŝin ankoraŭ surloke, priserĉanta flankejojn kaj anguletojn kaj provfrapanta plankojn. Li firme akompanis ŝin eksteren, forpreninte de ŝi plurajn etajn (sed iom valorajn) aĵojn, kiuj iel enfalis ŝian pluvombrelon. Ŝi mienis kvazaŭ pene elpensanta vere detruan disiĝan komenton; sed ŝi sukcesis diri, sin turnante sur la sojlo, nur:

— Vi ĝisvivos bedaŭron, junulo! Kial ankaŭ vi ne foriris? Vi ne apartenas ĉi tie; Baginzo vi ne estas — vi — vi estas Brandoboko!

— Ĉu vi aŭdis tion, Gaja? Jen insulto, ĉu ne vere, — diris Frodo fermante post ŝi la pordon.

— Tio estis komplimento, — diris Gaja Brandoboko, — kaj sekve, kompreneble, malvera.

Poste ili trairis la tutan truon, kaj elĵetis tri junajn hobitojn (du Bofinojn kaj unu Bolĝeron), kiuj tratruis la murojn de unu el la keloj. Frodo ankaŭ luktis kun juna Sanĉo Fierfuto (nepo de Odo Fierfuto), kiu komencis elfosadi en la pli granda manĝaĵejo, kie li pensis trovi eĥon. La legendo pri l' oro de Bilbo vekis tiel scivolon kiel esperon; ĉar legenda oro (mistere akirita, se ne sendispute kontraŭleĝa) estas, kiel ĉiuj scias, posedaĵo de l' trovinto — se la serĉo ne estas interrompita.

Venkinte Sanĉon kaj lin elpuŝinte, Frodo kolapsis sur seĝon en la vestiblo.

— Jam tempo fermi la butikon, Gaja, — li diris. — Ŝlosu la antaŭpordon, kaj ne malfermu ĝin plu hodiaŭ por iu ajn, eĉ se tiu alportas ramon.

Tiam li iris revigligi sin per malfrua taso da teo. Apenaŭ li sidiĝis, jen aŭdiĝis mallaŭta frapo ĉe la antaŭpordo. "Lobelia denove, plej verŝajne, — li pensis. — ŝi certe pripensis ion vere abomenan, kaj revenis por tion diri. Tio estas prokrastebla".

Li daŭrigis trinki sian teon. La frapo ripetiĝis, multe pli laŭte, sed li malatentis. Subite aperis ĉe la fenestro la kapo de l' sorĉisto.

— Se vi ne enlasos min, Frodo, mi eksplodigos vian pordon tra la tuta truo kaj eksteren tra l' monteto, — li diris.

— Kara mia Gandalfo! Momenteton! — kriis Frodo, kurante el la

ĉambro ĝis la antaŭpordo. — Envenu! Envenu! Mi pensis, ke tio estas Lobelia.

— Do mi pardonas vin. Mi ŝin vidis antaŭ iom da tempo, veturiganta kariolon al Apudakvo kun mieno, kiu acidigus freŝan lakton.

— Ŝi jam preskaŭ acidigis min. Vere, mi preskaŭ surfingrigis la ringon de Bilbo. Mi sopiris malaperi.

— Ne faru tion! — diris Gandalfo, sidiĝante. — Volu singardi pri tiu ringo, Frodo! Fakte, parte pri ĝuste tio mi venis diri lastan vorton.

— Nu, kio pri ĝi?

— Kion vi jam scias?

— Nur tion, kion Bilbo rakontis al mi. Mi aŭdis lian rakonton: kiel li trovis ĝin, kaj kiel li uzis ĝin: dum la vojaĝo, tio estas.

— Kiun rakonton, mi scivolas, — diris Gandalfo.

— Ho, ne tiun, kiun li rakontis al la gnomoj kaj enmetis en sian libron, — diris Frodo. — Li rakontis al mi la veron baldaŭ post kiam mi enloĝiĝis ĉi tie. Li diris, ke vi turmentis lin ĝis li sciigis tion al vi, do pli bone, ke ankaŭ mi sciu. “Manku sekretoj inter ni, Frodo, — li diris, — sed ili ne disvastiĝu aliloken. Ĉiuokaze ĝi estas mia”.

— Interese, — diris Gandalfo. — Nu, kion vi entute pensas pri la afero?

— Se per tio vi aludas, ke li inventis ĉion tion pri ‘donaco’, nu, mi opiniis pli verŝajna la malfalsan rakonton, kaj ne povis kompreni motivon por ĝin entute ŝanĝi. Tia faro estis ĉiuokaze netipe Bilba; kaj mi opiniis tion iom stranga.

— Ankaŭ mi. Sed strangaĵoj povas okazi al uloj, kiuj posedas tiajn valoraĵojn — se tiuj uzas ilin. Estu tio al vi averto, tre singardi pri ĝi. Eble ĝi havas aliajn kapablojn ol nur malaperigi vin, kiam vi tion deziras.

— Mi ne komprenas, — diris Frodo.

— Ankaŭ mi ne, — respondis la sorĉisto. — Mi nur komencis scivoli pri la ringo, precipe depost la pasinta nokto. Ne necesas ĝeniĝi. Sed se vi akceptos mian konsilon vi utiligos ĝin tre malofte, aŭ tute ne. Almenaŭ mi petegas vin ne uzi ĝin laŭ maniero, kiu kaŭzus klaĉojn aŭ vekus suspektojn. Mi diras denove: tenu ĝin sekura, kaj tenu ĝin sekreta!

— Vi parolas tre mistere! Kion vi timas?

— Mi ne certas, do mi diros nenion plu. Mi eble povos diri al vi ion, kiam mi revenos. Mi tuj foriras: do tio ĉi estas provizora adiaŭo. — Li stariĝis.

— Tuj! — kriis Frodo. — Sed mi pensis, ke vi restados dum minimume semajno. Mi antaŭĝojis pri via helpo.

— Tion mi ja intencis — sed mi estas devigita ŝanĝi mian intencon. Mi eble forestos dum kelka tempo; sed mi revenos vidi vin, tiel baldaŭ kiel mi

nur povos. Atendu min, kiam vi revidos min! Mi enŝteliĝos kviete. Mi ne ofte vizitos plu la Provincon malkaŝe. Mi trovas, ke mi iĝis iom malpopulara. Oni diras, ke mi estas ĝenulo kaj perturbanto de la trankvilo. Kelkaj eĉ akuzas min, ke mi formagiis Bilbon, aŭ eĉ pli malbone. Se vi volas scii, oni supozas komploton inter vi kaj mi por akiri liajn riĉaĵojn.

— Oni! — ekkriis Frodo. — Vi celas Odon kaj Lobelian. Kiel abomeninde! Mi fordonus al ili Bag-Endon kaj ĉion ceteran, se nur mi povus rehavi Bilbon kaj foriri kun li por travagi la landon. Mi amas la Provincon. Sed ial mi komencas bedaŭri, ke ankaŭ mi ne foriris. Mi scivolas, ĉu mi iam ajn revidos lin.

— Ankaŭ mi, — diris Gandalfo. — Kaj mi scivolas pri multaj aliaj aferoj. Jam adiaŭ! Gardu vin! Atendu min, precipe en tempoj neverŝajnaj! Adiaŭ!

Frodo akompanis lin ĝis la pordo. Li flirtigis lastfoje la manon, kaj ekformarŝis surprize rapidpaŝe; sed al Frodo ŝajnis, ke la maljuna sorĉisto aspektas pli ol kutime kurbigita, preskaŭ kvazaŭ li portus pezan ŝarĝon. Vesperiĝis, kaj lia mantelita figuro rapide malaperis en la krepuskon.

Dum longa tempo Frodo ne revidis lin.

2

La ombro de la pasinteco

La klaĉo ne formortis post naŭ aŭ eĉ naŭdek naŭ tagoj. La dua malapero de sinjoro Bilbo Baginzo estis diskutata en Hobiturbo, kaj efektive tra la tuta Provinco, dum jaro plus unu tago, kaj oni memoris ĝin multe pli longe. Ĝi fariĝis apudfajruja rakonto por junaj hobitoj; kaj fine Freneza Baginzo, kiu kutimis malaperi en krako kaj fulmo kaj reaperi kun sakoj da juveloj kaj oro, iĝis ŝatata rolanto en legendoj kaj pluvivis longe post kiara la veraj okazintaĵoj estis forgesitaj.

Sed dume, la ĝenerala opinio en la najbaraĵo estis, ke Bilbo, kiu ĉiam estis iom fola, finfine freneziĝis komplete, kaj forkuris en la Neniejon. Tie li sendube falis en lageton aŭ riveron kaj tragike, sed ne antaŭtempe, mortis. La kulpon oni direktis plejparte al Gandalfo.

"Se nur tiu sorĉistaĉo lasos trankvila junan Frodon, eble tiu maturiĝos kaj akiros iom da hobita sagaco", — oni diris. Kaj laŭ ĉiuj videblaj signoj la sorĉisto ja lasis trankvila Frodon, kaj tiu ja maturiĝis, sed la akirado de hobita sagaco ne tre rimarkeblis. Efektive, li tuj komencis daŭrigi la reputacion de Bilbo pri nenormaleco. Li rifuzis funebri; kaj la postan jaron li aranĝis feston honore al la cent dek-dua naskiĝdatreveno de Bilbo, kiun li nomis Kvintala Festo. Sed tio estis subtakso, ĉar dudek gastoj ja estis invititaj, kaj okazis pluraj manĝoj, dum kiuj neĝadis manĝaĵoj kaj trinkaĵoj, laŭ hobita esprimo.

Kelkaj iom ŝokiĝis; sed Frodo daŭrigis la kutimon festi la Naskiĝdaton de Bilbo jaron post jaro ĝis oni kutimiĝis al tio. Li diris, ke al li ne plaĉas pensi, ke Bilbo mortis. Kiam oni demandis: "Do, kie li troviĝas?" — li ŝultrotiris.

Li vivis sola, samkiel Bilbo; sed li havis sufiĉe multajn amikojn precipe inter la pli junaj hobitoj (plejparte posteuloj de la Maljuna Tjuko), kiuj infanaĝe amis Bilbon kaj ofte vizitadis Bag-Endon. Folko Bofino kaj Fredegaro Bolĝero estis du el ili; sed liaj plej intimaj amikoj estis Peregrino Tjuko (kutime nomata Grinĉjo), kaj Gaja Brandoboko (lia reala nomo estis Gajadoko, sed tion oni malofte memoris). Frodo trapromenis la Provincon kun ili; sed pli ofte li vagis sola, kaj je la miro de la sagaculoj li estis kelkfoje vidita malproksime de la hejmo, promenanta sur la montetoj kaj en arbaroj sub la lumo de la steloj. Gaja kaj Grinĉjo suspektis, ke tiutempe li

vizitas la elfojn, kiel faris Bilbo.

Kun pasado de la tempo oni komencis rimarki, ke ankaŭ Frodo montris signojn de bona “konserviĝo”: ekstere li retenis aspekton de fortika kaj energia hobito ĵus forlasinta la interon. “Kelkiuj bonŝancas”, — oni diris. Sed kiam Frodo proksimiĝis al pli serioza aĝo de kvindek oni komencis opinii tion strangeta.

Frodo mem, post la unua ŝoko, trovis, ke esti la propra mastro kaj *la* sinjoro Baginzo de Bag-Endo estas iom agrable. Dum pluraj jaroj li estis tute feliĉa kaj ne multe zorgis pri la estonteco. Sed duone sen lia konscio, konstante kreskis en li bedaŭro, ke li ne akompanis Bilbon. Li trovis sin foje, precipe aŭtune, scivolanta pri la sovaĝejoj, kaj venis en liajn sonĝojn strangaj vizioj pri montoj, kiujn li neniam vidis. Li komencis diri al si: “Eble iun tagon mi mem transiros la Riveron”. Al tio ĉiam respondis la alia duono de lia menso: “Ankoraŭ ne”.

Daŭris tiel same, ĝis elĉerpiĝis liaj kvardekaj jaroj, kaj proksimiĝis lia kvindeka naskiĝdatreveno: kvindek estis cifero, kiun li sentis iom signifoplena (aŭ minaca); estis ĉiuokaze tiu aĝo, en kiu al Bilbo subite okazis aventuroj. Frodo eksentis sin netrankvila, kaj la malnovaj vojetoj ŝajnis tro bone konataj. Li rigardis landkartojn, kaj scivolis, kio troviĝas trans iliaj randoj: landkartoj desegnitaj en la Provinco indikis plejparte blankajn spacojn aliflanke de la landlimo. Li komencis vagi pli malproksimen kaj pli ofte sola; kaj Gaja kaj la ceteraj amikoj gvatis lin zorgoplene. Ofte oni vidis lin marŝanta kaj parolanta kun fremdaj vagabondoj, kiuj tiutempe komencis vidiĝi en la Provinco.

Aŭdiĝis onidiroj pri strangaj okazaĵoj en la ekstera mondo; kaj pro tio, ke jam de kelkaj jaroj Gandalfo ne reaperis nek sendis iun mesaĝon, Frodo kolektis ĉiujn eblajn novaĵojn. Elfojn, kiuj pli frue malofte promenis en la Provinco, oni nun vidis pasi okcidenten tra l’ arbaroj vespere, pasi kaj ne reveni; sed ili skuis siajn kapojn kaj foriris kantante malĝoje al si mem. Troviĝis tamen gnomoj en nekutimaj kvantoj. La granda Okcidenta Vojo, kompreneble, trapasis la Provincon trans la Ponton Brandovino, kaj gnomoj ĉiam de tempo al tempo uzadis ĝin. Ili estis la ĉefa fonto por hobitoj de novaĵoj el malproksimaj lokoj — se ili tiujn deziris; kutime la gnomoj diris malmulton kaj hobitoj neniom pli demandis. Sed nun Frodo ofte renkontis fremdajn gnomojn diversspecajn, venantajn el la sudaj landoj. Ili estis zorgoplenaj, kaj iuj parolis flustre pri la Malamiko kaj pri la lando Mordoro.

Tiun nomon la hobitoj konis nur en legendoj pri l’ malhela pasinteco, kiel ombron fone de siaj memoroj; sed ĝi estis minaca kaj maltrankviliga. Ŝajnis, ke la malica potenco en Mornarbaro estis forpelita de la Blanka Koncilio, sed reaperis pli multnombre en la malnovaj fortikaĵoj de Mordoro.

La Malhela Turo estis rekonstruita, oni diris. De tie la potenco disvastiĝadis tre larĝe kaj malproksime, kaj en la lontanaj oriento kaj sudo okazis militoj kaj kreskanta timo. Orkoj denove multiĝis en la montaro. Troloj estis aktivaj, ne plu mense malviglaj, sed ruzaj kaj armitaj per timindaj armiloj. Kaj aŭdiĝis murmuraj aludoj pri kreaĵoj eĉ pli teruraj ol tiuj, sed ili malhavis nomon.

El ĉio ĉi malmulto, kompreneble, atingis l' orelojn de ordinaraj hobitoj. Sed eĉ la plej surdaj kaj plej maleliremaj komencis aŭdi rakontojn strangajn, kaj tiuj, kies aferoj kondukis ilin ĝis la landlimoj, vidis nenormalaĵojn. Konversacio en *La Verda Drako* en Apudakvo, iun vesperon printempe de l' kvindeka jaro de Frodo, montris, ke eĉ en la komforta kerno de la Provinco aŭdiĝis famoj, kvankam la plimultaj hobitoj daŭre priridis ilin.

Sam Vato sidis en unu angulo proksime al la fajro, kaj kontraŭ li estis Ted Sablomano, filo de l' muelisto; kaj diversaj aliaj kamparaj hobitoj aŭskultis ilian interparoladon.

— Strangajn aferojn oni aŭdas nuntempe, ĉu ne vere, — diris Sam.

— Ha, — diris Ted, — aŭdas ja, se oni aŭskultas. Sed mi povas aŭdi kameno-rakontojn kaj porinfanajn historiojn hejme, se mi tion deziras.

— Sendube, — rebatis Sam, — kaj ŝajnas al mi, ke troviĝas en ili pli da vero ol vi supozas. Kiu inventis la rakontojn ĉiuokaze? Pripensu ekzemple drakojn.

— Dankon, ne, — diris Ted, — tion mi ne faros. Mi aŭdis pri ili, kiam mi estis juna, sed ne necesas kredi pri ili nun. Ekzistas nur unu Drako en Apudakvo, kaj tiu estas Verda, — li diris, kaŭzante ĝeneralan ridadon.

— Bone, — diris Sam, ridante kun la aliaj. — Sed kio pri tiuj Arbohomoj, tiuj gigantoj, kiel oni povus nomi ilin? Oni ja diras, ke unu pli granda ol arbo estis vidita malproksime post la Nordaj Erikejoj antaŭnelonge.

— Kiu estas *oni*?

— Mia kuzo Hal inter aliaj. Li laboras por sinjoro Bofino ĉe Supramonto kaj iras al Nord-kvarono por ĉasi. Li *vidis* unu.

— Diras tion, eble. Via Hal ĉiam diradas, ke li vidis aferojn; kaj eble li vidas aferojn, kiuj ne troviĝas.

— Sed tiu estis tiel granda kiel ulmo, kaj marŝis — marŝis sep jardojn ĉiupaŝe, minimume.

— Do mi vetas, ke ne minimume. Tio, kion li vidis, *estis* ulmo, plej verŝajne.

— Sed tiu *marŝis*, mi insistas; kaj ne troviĝas eĉ unu ulmo sur la Nordaj Erikejoj.

— Sekve Hal ne povis vidi ulmon, — diris Ted.

Okazis iom da ridado kaj aplaŭdado; la aŭskultintoj ŝajnis supozi, ke Ted trafis.

— Malgraŭ ĉio, — diris Sam, — vi ne povas malagnoski, ke aliaj krom nia Halfasto vidis strangulojn transpasi la Provincon — transpasi ĝin, notu; aliaj estas resendataj ĉe la landlimoj. La Limuloj neniam antaŭe estis tiel okupataj. Kaj mi aŭdis famojn, ke la elfoj moviĝas okcidenten. Oni ja diras, ke ili iras la havenojn, malproksimen post la Blankaj Turoj.

Sam gestis per la brako malprecize: nek li nek iu ajn el ili sciis, kiom malproksima estas la maro, aliflanke de l' malnovaj turoj preter la okcidenta limo de la Provinco. Sed malnova tradicio estis, ke tie malproksime troviĝis la Grizaj Havenoj, de kiuj elfŝipoj kelkfoje ekvelis, kaj neniam revenis.

— Ili velas, velas, veladas trans la maron, ili iras okcidenten kaj forlasas nin, — diris Sam, duonĉantante la vortojn, skuante triste kaj solene la kapon. Sed Ted ridis.

— Nu, nenio nova, se vi kredas la antikvajn rakontojn. Kaj al mi ne estas klare, kiom tio koncernas min aŭ vin. Lasu ilin veli! Sed mi garantias, ke vi ne vidis ilin fari tion; nek iu ajn alia en la Provinco.

— Nu, mi ne scias, — diris Sam penseme. Li kredis, ke unu fojon li vidis elfon en la arbaro, kaj ankoraŭ esperis iam vidi aliajn. El ĉiuj legendoj, kiujn li aŭskultis dum siaj fruaj jaroj, tiuj fragmentoj de rakontoj kaj duonmemoritaj historioj pri la elfoj, kiujn la hobitoj konis, ĉiam emociis lin plej profunde. — Troviĝas iuj, eĉ en tiu ĉi loko, kiuj konas la Helulojn kaj ricevas novaĵojn pri ili, — li diris. — Jen sinjoro Baginzo, ekzemple, por kiu mi laboras. Li diris al mi, ke ili ekvelas, kaj li konas iom pri elfoj. Kaj maljuna sinjoro Bilbo konis eĉ pli: multe mi konversaciis kun li, kiam mi estis eta knabo.

— Ho, al ambaŭ mankas klapo, — diris Ted. — Ĉiuokaze maljuna Bilbo malhavis klapon en la kapo, kaj al Frodo ekmankas. Se de tie vi ricevas viajn novaĵojn, vi neniam malhavos sensencaĵojn. Nu, amikoj, mi hejmeniras. Sanon al vi! — Li eltrinkis sian kruĉon kaj brue foriris.

Sam sidis silente kaj diris nenion pli. Multon li havis por pripensi. Ekzemple, multo estis farenda en la Bag-Enda ĝardeno, kaj morgaŭ estus tago tre okupata, se la vetero pliboniĝus. La herbo kreskis rapide. Sed la menson de Sam okupis ne nur la ĝardeno. Post kelka tempo li suspiris, stariĝis kaj eliris.

Estis frua aprilo, kaj la ĉielo jam sennubiĝis post peza pluvado. La suno subiris, kaj malvarmeta pala vespero kviete noktiĝadis. Li marŝis hejmen sub la fruaj steloj tra Hobiturbo kaj supren laŭ la Monteto, fajfante mallaŭte kaj penseme.

Ĝuste tiutempe reaperis Gandalfo post sia longa foresto. Dum tri jaroj

post la Festo li restis malproksime. Poste li vizitis mallonge Frodon, kaj rigardesplorinte lin tre zorge foriris denove. Dum la postaj unu-du jaroj li reaperis relative ofte, alvenante neatendite post la krepusko, kaj forirante senaverte antaŭ la sunleviĝo. Li rifuzis diskuti siajn proprajn aferojn kaj vojaĝojn kaj ŝajnis interesiĝi ĉefe pri etaj informoj rilate la sanon kaj agadon de Frodo.

Tiam subite ĉesis liaj vizitoj. Jam pasis pli ol naŭ jaroj de kiam Frodo vidis lin aŭ aŭdis pri li, kaj li komencis supozi, ke la sorĉisto neniam revenos kaj rezignis interesiĝi pri hobitoj. Sed tiun vesperon, dum Sam marŝis hejmen, kaj krepusko noktiĝis, aŭdiĝis sur la kabineta fenestro la iam konata frapeto.

Frodo bonvenigis surprizite kaj ĝojplene sian malnovan amikon. Ili fikse rigardadis unu la alian.

— Ĉio en ordo, ĉu? — diris Gandalfo. — Vi aspektas same kiel ĉiam, Frodo!

— Ankaŭ vi, — Frodo respondis; sed sekrete li pensis, ke Gandalfo aspektas pli maljuna kaj pli zorgoplena. Li urĝe petis de li novaĵojn pri li kaj pri la vasta mondo, kaj baldaŭ ili profundiĝis en konversacion, kaj ili restis sendormaj dum granda parto de la nokto.

La postan matenon, post malfrua matenmanĝo, la sorĉisto sidis kun Frodo apud la malfermita fenestro de l' kabineto. Hela fajro estis en la kameno, kvankam la suno estis varma, kaj la vento estis suda. Ĉio aspektis freŝa, kaj la nova verdo de l' printempo tremadis sur la kampoj kaj sur la pintoj de l' arbofingroj.

Gandalfo pensis pri printempo, antaŭ preskaŭ okdek jaroj, kiam Bilbo forkuris el Bag-Endo sen eĉ naztuko. Liaj haroj estis eble pli blankaj ol tiam, kaj liaj barbo kaj brovoj estis eble pli longaj, kaj lia vizaĝo pli sulkita pro zorgoj kaj saĝo; sed brilis liaj okuloj same vigle, kaj li fumis kaj blovis fumringojn same energie kaj ĝojplene.

Li fumis en silento, ĉar Frodo sidis senmove, profunde pensante. Eĉ en la matena lumo li sentis la malhelan ombron de la novaĵo alportita de Gandalfo. Fine li rompis la silenton.

— Hieraŭ nokte vi komencis rakonti al mi strangaĵojn pri mia rin~ go, Gandalfo, — li diris. — Kaj poste vi ĉesis, ĉar vi diris, ke tiajn aferojn oni prefere lasu ĝis taglumo. Ĉu vi ne pensas, ke prefere vi finrakontu nun? Vi asertas, ke la ringo estas danĝera, multe pli danĝera ol mi supozas. Kiamaniere?

— Multmaniere, — respondis la sorĉisto. — Ĝi estas multe pli potenca, ol mi riskis supozi unuavide, tiel potenca, ke en la fino ĝi komplete venkos iun ajn mortemulon, kiu posedos ĝin. Ĝi plenregos lin.

» En Eregiono antaŭ longe multaj elfaj ringoj estis fabrikitaj, magiaj ringoj, kiel vi nomas ilin, kaj ili estis, kompreneble, diversspecaj: iuj pli potencaj, iuj malpli. La malpli potencaj ringoj estis nur provaĵoj de la metio antaŭ ol ĝi plenkreskis, kaj laŭ la elfaj metiistoj ili estis nuraj bagatelaĵoj — tamen, laŭ mia opinio, danĝeraj al mortemuloj. Sed la Grandaj Ringoj, la Ringoj de Potenco, ili estis efektive danĝeregaj.

» Mortemulo, Frodo, kiu retenas unu el la Grandaj Ringoj, ne mortas, sed li nek kreskas nek ricevas pli da vivo, li tutsimple daŭras, ĝis fine ĉiu minuto estas tedaĵo. Kaj se li ofte uzas la Ringon por nevidebligi sin, li *fadas*: finfine li fariĝas nevidebla, kaj marŝas en la krepusko sub rigardo de la malhela potenco, kiu regas la Ringojn. Jes, pli aŭ malpli frue — malpli, se li estas forta aŭ bonintenca komence, sed nek forto, nek bonintenco daŭros eterne — pli aŭ malpli frue la malhela potenco englutos lin.

— Kiel timige! — diris Frodo. Sekvis longa silento. La sono de Sam Vato tondanta la gazonon enpenetris de la ĝardeno.

— Kiom longe vi scias tion? — demandis finfine Frodo. — Kaj ĝis kioma grado Bilbo sciis?

— Bilbo sciis ne pli, ol li sciigis al vi, mi certas, — diris Gandalfo. — Li certe neniam donus al vi ion, kion li supozus danĝero, eĉ kvankam mi promesis prizorgi vin. Li pensis, ke la ringo estas tre bela, kaj laŭbezone tre utila; kaj se io estis malĝusta aŭ nenormala, tio estis li mem. Li diris ke ĝi "pli kaj pli okupis lian menson", kaj li senĉese zorgis pri ĝi; sed li ne suspektis, ke kulpas la ringo mem. Tamen li rimarkis, ke necesas okupiĝi pri la aĵo; ĝi ne ŝajnis ĉiam samgranda aŭ sampeza; ĝi ŝrumpis aŭ ŝvelis strangmaniere, kaj povis subite forgliti desur fingro, sur kiu ĝi estis strikta.

— Jes, li avertis min pri tio en sia lasta letero, — diris Frodo, — do mi ĉiam konservis ĝin sur ĝia ĉeno.

— Tre saĝe, — diris Gandalfo. — Sed rilate sian longan vivon, Bilbo tute neniam ligis tion al la ringo. Li proprigis al si la tutan meriton de tio, kaj tre fieris pri ĝi. Malgraŭ tio, ke li iĝis malflegma kaj maltrankvila. "Maldika kaj eltirita", — li diris. Signo, ke ekregas la ringo.

— Kiom longe vi sciis ĉion ĉi? — demandis Frodo denove.

— Sciis? — diris Gandalfo. — Mi sciis multon, kion scias nur la Saĝaj, Frodo. Sed se vi celas diri, "sciis pri *tiu ĉi* ringo", nu, mi ankoraŭ ne *scias*, oni povus diri. Atendas lasta eksperimento. Sed mi ne plu pridubas mian konjekton. Kiam mi unue ekkonjektis? — li meditis, traserĉante sian memoron. — Mi pripensu. — Tio okazis en la jaro, kiam la Blanka Koncilio elpelis la malhelan potencon el Mornarbaro, ĝuste antaŭ la Batalo de Kvin Armeoj, kiam Bilbo trovis sian ringon. Ombro kovris mian koron tiam, kvankam mi ankoraŭ ne sciis, kion mi timas. Mi scivolis ofte, kiel

Golumo akiris Grandan Ringon, kia ĝi klare estis — tio, almenaŭ, evidentis jam de la komenco. Poste mi aŭdis la strangan rakonton de Bilbo, kiel li “vetgajnis” ĝin, kaj tion mi ne povis kredi. Kiam mi finfine sukcesis elpremi el li la veron, mi konstatis tuj, ke li klopodis eksterdubigi sian rajton al la ringo. Tre simile al Golumo, kun ties “naskiĝdata donaco”. La mensogoj tro similis unu alian por trankviligi min. Klare la ringo posedis potencon malsanecan, kiu senprokraste ekinfluis ĝian kuratoron. Tio estis la unua reala averto ricevita de mi, ke ne ĉio estas en ordo. Mi diris al Bilbo ofte, ke tiajn ringojn oni prefere lasu neuzitaj; sed tio lin indignigis, kaj li baldaŭ ekkoleris. Malmulton pluan mi povis fari. Mi ne povis forpreni ĝin de li sen kaŭzi pli grandan domaĝon; kaj mi ĉiuokaze tion ne rajtis. Mi povis nur atendi rigardante. Eble mi povintus konsulti Sarumanon la Blankan, sed io ĉiam malhelpis min.

— Kiu li estas? — demandis Frodo. — Mi neniam antaŭe aŭdis pri li.

— Eble ne, — respondis Gandalfo. — Ne koncernas lin, aŭ ne koncernis, la hobitoj. Tamen li estas elstara inter la Saĝaj. Li estas ĉefo de mia ordeno kaj la estro de la Koncilio. Profundas liaj scioj, sed kun ili kreskis lia fiero, kaj al li malplaĉas iaj intervenoj. La tradiciaro de l’ elfaj ringoj, jen lia fako. Li longe studis ilin, serĉante la perditajn sekretojn de ilia fabrikado; sed kiam la Ringoj estis debatitaj en la Koncilio, ĉio, kion li konsentis malkaŝi al ni el sia ringo-kono, kontraŭdiris miajn timojn. Do, mia dubemo dormis — sed netrankvile. Plu mi rigardis kaj atendis.

» Kaj ĉio ŝajnis en ordo ĉe Bilbo. Kaj la jaroj pasis. Jes, ili pasis, kaj ili ŝajnis ne tuŝi lin. Li montris neniajn signojn de pliaĝiĝo. La ombro kovris min denove. Sed mi diris al mi: “Finfine li devenas de l’ patrina flanko de familio longviva. Restas tempo ankoraŭ. Atendu!”

» Kaj mi atendis. Ĝis tiu nokto, kiam li forlasis tiun ĉi domon. Li tiam diris kaj faris aferojn, kiuj plenigis min de timo, kiun ne povis forigi iuj ajn vortoj de Sarumano. Mi sciis finfine, ke io malhela kaj mortiga filaboras. Kaj ekde tiam mi pasigis la pliparton de la jaroj, eltrovante la veron pri ĝi.

— La damaĝo neniel estis permanenta, ĉu? — demandis Frodo netrankvile. — Estis al li bonorde post iom da tempo, ĉu ne? Li povis ripozi en paco, mi volas diri?

— Li tuj sin sentis pli bonfarta, — diris Gandalfo. — Sed ekzistas nur unu Potenco en tiu ĉi mondo, kiu scias ĉion pri la Ringoj kaj ties efikoj; kaj laŭ mia scio ne ekzistas iu ajn Potenco en la mondo, kiu scias ĉion pri la hobitoj. Inter la Saĝaj mi estas la sola, kiu interesiĝas pri la hobitoj: konfako maleminenta, sed surprizoplena. Molaj kiel butero ili povas esti, kaj tamen kelkfoje obstinaj kiel malnovaj arbradikoj. Mi opinias, ke iuj probable kapablus rezisti la Ringojn multe pli longe ol kredas la plimulto el la Saĝaj.

Al mi ŝajnas, ke vi ne havu zorgojn pri Bilbo.

» Kompreneble, li posedis la ringon dum multaj jaroj, kaj uzis ĝin, do eble necesos longa tempo ĝis la influo malaperos — ĝis estos sendanĝere se li revidos ĝin, ekzemple. Se ne, li eble pluvivos dum jaroj, tute feliĉe: nur haltos tie, kie li estis, kiam li liberiĝis de ĝi. Ĉar en la fino li rezignis pri ĝi propravole: tre grava punkto. Ne, mi ne ĝenis min plu pri kara Bilbo, kiam li fine malkroĉiĝis de ĝi. Estas ĝuste *vi*, pri kiu mi sentas respondecon.

» Ekde kiam Bilbo foriris, mi havis profundajn zorgojn pri vi, kaj pri ĉiuj ĉi ĉarmaj, absurdaj, senrimedaj hobitoj. Estus doloriga bato al la mondo, se la Malhela Potenco venkus la Provincon; se ĉiuj viaj bonkoraj, gajaj, stultaj, Bolĝeroj, Kornblovoj, Bofinoj, Bresgirdeloj, kaj la ceteraj, por ne paroli pri la ridindaj Baginzoj, sklaviĝus.

Frodo frostotremis.

— Sed pro kio ni sklaviĝu? — li demandis. — Kaj pro kio li dezirus tiajn sklavojn?

— Se diri la veron, — respondis Gandalfo, — mi kredas, ke ĝis nun — *ĝis nun*, atentu — li tute preterrimarkis la ekziston de hobitoj. Vi devus esti dankema. Sed via sekureco forpasis. Li vin ne bezonas — li havas multajn servistojn pli utilajn — sed li neniam plu forgesos vin. Kaj hobitoj mizersklavaj multe pli plaĉus al li ol hobitoj feliĉaj kaj liberaj. Ekzistas tiaj fenomenoj, kiaj malico kaj venĝemo!

— Ĉu venĝemo? — diris Frodo. — Venĝemo pro kio? Mi ankoraŭ ne komprenas, kiamaniere ĉio ĉi tuŝas Bilbon kaj min kaj nian ringon.

— Ĉiel ĝi tuŝas vin, — diris Gandalfo. — Vi ankoraŭ ne konscias la veran danĝeregon; sed tion vi konscios. Mi mem ne certis pri ĝi, kiam mi lastfoje estis ĉi tie, sed jam tempo venis por paroli. Donu al mi por momento la ringon.

Frodo elprenis ĝin de sia pantalonpoŝo, kie ĝi estis kroĉita al ĉeno pendanta de l' zono. Li malkroĉis ĝin kaj transdonis ĝin malrapide al la sorĉisto. Ĝi subite sentiĝis tre peza, kvazaŭ iel ĝi aŭ Frodo mem malemus, ke tuŝu ĝin Gandalfo.

Gandalfo levis ĝin. Ĝi aspektis farita el pura kaj solida oro.

— Ĉu vi povas vidi sur ĝi iujn gravuraĵojn? — li demandis.

— Ne, — diris Frodo. — Malestas tiaj. Ĝi estas tute senornama, kaj neniam ĝi montras grataĵon aŭ signon de foruziĝo.

— Nu bone, rigardu! — Mirigante kaj maltrankviligante Frodon, la sorĉisto subite ĵetis ĝin en la mezon de ardanta fajrangulo. Frodo elpuŝis krion kaj palpserĉis karboprenilon; sed Gandalfo retenis lin.

— Atendu! — li diris ordonvoĉe, ĵetante al Frodo ekrigardon el sub la hirtaj brovoj.

Neniel videble ŝanĝiĝis la ringo. Post kelka tempo Gandalfo stariĝis, fermis la ŝutrojn, kaj kuntiris la kurtenojn. La ĉambro iĝis malluma kaj silenta, kvankam klakado de l' tondilo de Sam, jam pli proksima al la fenestroj, plu aŭdiĝis mallaŭte el la ĝardeno. La sorĉisto staris momente, rigardante la fajron; poste li klinis sin kaj per la karboprenilo eltiris la ringon ĝis la antaŭkameno, kaj tuj ĝin enmanigis. Frodo spasme respiris.

— Ĝi estas tute malvarmeta, — diris Gandalfo. — Prenu ĝin! — Frodo ricevis ĝin sur sian foriĝeman manplaton: ĝi ŝajnis iĝinta pli ol iam dika kaj peza.

— Levu ĝin! — diris Gandalfo. — Kaj rigardu de proksime! Kiam Frodo tion faris, li jam ekvidis fajnajn liniojn, pli fajnajn ol la plej fajnaj plumstrekoj, etendiĝantajn laŭlonge de l' ringo, ekstere kaj interne: linioj fajraj, kiuj ŝajnis formi literojn de flua skribmaniero. Ili helis pike brilaj, kaj tamen foraj, kvazaŭ el profundego.



— Mi ne scias legi la fajrajn literojn, — diris Frodo tremvoĉe.

— Ne, — diris Gandalfo, — sed mi scias. La literoj estas elfaj, laŭ la antikva maniero, sed la lingvo estas tiu de Mordoro, kiun mi ne prononcos ĉi tie. Sed en la Komuna Lingvo jen kio estas skribita, sufiĉe fidele:

Unu Ringo ilin regas, Unu ilin prenas,
Unu Ringo en mallumon ilin gvidas kaj katenas.

» Tio estas nur du versoj el strofo jam longe konata en elfaj tradicioj:

Tri ringoj por la elfoj sub la hela ĉiel',
Sep por la gnomoj en salonoj el ŝton'.
Naŭ por la homoj sub la morto-sigel',
Unu por la Nigra Reĝo sur la nigra tron'
Kie kuŝas Ombroj en Mordora Land'.
Unu Ringo ilin regas, Unu ilin prenas,
Unu Ringo en mallumon ilin gvidas kaj katenas
Kie kuŝas Ombroj en Mordora Land'.[6]

Li paŭzis, poste diris malrapide per profunda voĉo:

— Tio ĉi estas la Mastro-ringo, la Unu Ringo por ĉiujn regi. Tio ĉi estas la Unu Ringo, kiun li perdis antaŭ longe-longe, ege malfortiginte sian potencon. Li tre deziras ĝin — sed li nepre *ne* reakiru ĝin.

Frodo sidis silenta kaj senmova. Timo ŝajnis aletendi larĝegan manon, kiel malhelan nubon leviĝantan en la oriento kaj minacantan engluti lin.

— Tiu ĉi ringo! — li balbutis. — Kiel, kiel povis okazi, ke ĝi alvenis min?

— Ha! — diris Gandalfo. — Tio estas tre longa rakonto. La originoj troviĝas prae en la Nigraj Jaroj, kiujn memoras nun nur la tradicigardantoj. Se mi rakontus al vi tiun tutan historion, ni plu sidadus ĉi tie ĝis kiam la printempo jam vintriĝis. Sed en la pasinta nokto mi rakontis al vi pri Saŭrono la Granda, la Malhela Mastro. La onidiroj, kiujn vi aŭdis, estas veraj: li ja releviĝis kaj lasis sian turon en Mornarbaro kaj revenis al sia antikva fortikaĵo en la Malluma Turo de Mordoro. Tiun nomon eĉ vi hobitoj aŭdis, kiel ombron rande de malnovaj rakontoj. Ĉiam post malvenko kaj ripoztempo, la Ombro aliformiĝas kaj kreskas denove.

— Se nur ĝi ne devis okazi en mia epoko, — diris Frodo.

— Tiel pensas ankaŭ mi, — diris Gandalfo, — kaj tiel pensas ĉiuj, kiuj travivas tiajn epokojn. Sed tion ne ili decidas. Ni rajtas decidi nur tion, kion fari dum la tempo allasita al ni. Kaj jam, Frodo, nia epoko ekaspektas nigra. La Malamiko rapide tre fortiĝas. Liaj planoj, laŭ mia opinio, estas ankoraŭ nematuraj, sed ili maturiĝas. Ni havos grandajn malfacilaĵojn. Ni havus grandajn malfacilaĵojn eĉ sen tiu ĉi terura hazardaĵo. Al la malamiko ankoraŭ mankas unu afero por doni al li forton kaj konojn por frakasi ĉian reziston, rompi la lastajn defendrimedojn, kaj kovri ĉiujn landojn per dua mallumo. Al li mankas la Unu Ringo.

» La Trion, plej belan el ĉiuj, la elfaj mastroj kaŝis al li, kaj tiujn lia mano neniam tuŝis aŭ makulis. Sepon la gnomaj reĝoj posedis, sed el ĝi li rehavigis al si tri, kaj la ceterajn konsumis la drakoj. Naŭ li donis al homoj, fieraj kaj fortaj, kaj tiel enretigis ilin. Antaŭ longe ili venis sub rego de la Unu, kaj ili iĝis Ringfantomoj, ombroj en lia granda Ombro, la plej timindaj el liaj servistoj. Antaŭ longe. Pasis multaj jaroj de kiam la Naŭ marŝis ekstere. Tamen, kiu scias? Dum la Ombro denove kreskas, eble ankaŭ ili marŝos ankoraŭfoje. Sed ĉit! Ni ne parolos pri tiaj aferoj eĉ en la mateno de l’ Provinco.

» Do statas jene: la Naŭon li altiris al si; ankaŭ la Sepon, krom la detruitaj. La Trio restas kaŝita. Sed tio ne plu ĝenas lin. Li bezonas nur la Unu; ĉar li fabrikis mem tiun ringon, ĝi estas lia, kaj li lasis trapasi en ĝin grandan parton de sia antaŭa potenco, tiel ke li povu regi ĉiujn aliajn. Se li reakiros ĝin, tiam li denove estros ĉiujn, kie ajn ili troviĝos, eĉ la Trion, kaj ĉio plenumita per ili malkaŝiĝos, kaj li estos pli ol iam potenca.

» Kaj jen la terura hazardaĵo, Frodo. Li kredis, ke la Unu pereis; ke detruis ĝin la elfoj, kiel devis okazi. Sed li jam scias, ke ĝi ne pereis, ke ĝi

estas trovita. Do li serĉas, serĉadas ĝin, kaj lia tuta pensado celas tion. Ĝi estas lia granda espero kaj nia granda timo.

— Kial, kial ĝi ne estas detruita? — ekkriis Frodo. — Kaj kiel okazis, ke la Malamiko perdis ĝin, se tiel potenca li estis, kaj ĝi estis al li tiel valorega? — Li spasme premis la Ringon, kvazaŭ li jam vidus malhelajn fingrojn etendiĝantajn por ĝin forkapti.

— Ĝi estis forprenita de li, — diris Gandalfo. — La rezistoforto de la elfoj pratempe estis pli granda; kaj ne ĉiuj homoj distanciĝis de ili. La homoj el Okcidentio aldonis sian helpon. Tiu estas ĉapitro el la antikva historio, kiun rememori estus eble taŭge; ĉar tiam ekzistis ankaŭ malĝojo, kaj ĉirkaŭvenanta mallumo, sed granda kuraĝo, kaj grandiozaj faraĵoj, kiuj ne tute vanis. Iam, eble, mi rakontos al vi la tutan historion, aŭ vi aŭdos ĝin tutan en rakonto de iu, kiu pli bone konas ĝin.

» Sed intertempe, antaŭ ĉio vi bezonas scii, kiel alvenis al vi tiu ĉi aĵo, kaj tio estas rakonto sufiĉe longa, jen ĉio, kion mi diros. Estis elfreĝo Gil-Galado, kaj Elendilo el Okcidentio, kiuj venkis Saŭronon, kvankam ili mem pereis tion farante; kaj Isilduro, la filo de Elendilo, fortranĉis la Ringon de sur la mano de Saŭrono kaj proprigis ĝin al si. Tiam Saŭrono estis venkita, kaj lia spirito fuĝis kaj estis dum longaj jaroj kaŝita, ĝis lia ombro denove formiĝis en Mornarbaro. Sed la Ringo estis perdita. Ĝi enfalis la Grandan Riveron Anduino, kaj malaperis. Ĉar Isilduro marŝis norden laŭ la orienta bordo de l' Rivero, kaj proksime de la Iridaj Kampoj lin embuskis la orkoj de l' Montoj, kaj preskaŭ ĉiuj liaj sekvantoj estis mortigitaj. Li ensaltis la akvon, sed dum li naĝis la Ringo forglitis de lia fingro, kaj poste la orkoj lin ekvidis kaj sage mortigis.

Gandalfo paŭzis.

— Kaj tie en la malhelaj fundaĵoj inter la Iridaj Kampoj, — li diris, — la Ringo forpasis el konateco kaj legendoj; kaj eĉ tiom el ĝia historio estas nun konata nur al malmultaj, kaj la Konsilio de l' Saĝuloj povis eltrovi neniom pli. Sed finfine ŝajnas al mi, ke mi kapablas daŭrigi la rakonton.

» Longe poste, sed ankoraŭ tre prae, loĝadis borde de la Granda Rivero rande de Sovaĝujo popoleto lertmana kaj kvietpaŝa. Mi konjektas, ke ĝi estis hobiteca, parenca al la patroj de l' patroj de l' sturoj, ĉar ĝi amis la Riveron, kaj ofte naĝis en ĝi, aŭ konstruis boatetojn el junkoj. Inter ili troviĝis familio altreputacia, pli multnombra kaj riĉa ol la plimulto, kaj ĝin regis avino de l' popolo, severa kaj saĝa pri la malnova konaro, tiom, kiom ili posedis ĝin. La plej esplorerna kaj scivolema familiano nomiĝis Smeagolo. Lin interesis radikoj kaj originoj; li plonĝis en profundajn lagetojn; li trafosis sub arboj kaj kreskantaj vegetaĵoj; li tunelis en verdajn teramasojn; kaj li ĉesis suprenrigardi al la montetopintoj, aŭ arbaj folioj, aŭ

floroj malfermiĝantaj en la aero; lia kapo kaj liaj okuloj direktiĝis malsupren.

» Li havis amikon similspecan, nomatan Deagolo, pli akrokulan sed ne tiel viglan kaj fortan. Foje ili enboatiĝis kaj aliris la Iridajn Kampojn, kie troviĝis bedegoj da iridoj kaj skirpoj. Tie eliris Smeagolo kaj tranazis la bordon, sed Deagolo sidis en la boato por fiŝkapti. Subite, granda fiŝo surhokiĝis, kaj antaŭ ol li sciis, kio okazas, li estis eltrenita en la akvon ĝis la fundo. Tie li forlasis sian ŝnureton, ĉar ŝajnis al li, ke li vidas ion brilantan sur la riverfundo; kaj retenante la spiron li ekkaptis ĝin.

» Poste li alsurfaciĝis sputante, kun herbaĉoj inter la haroj kaj manpleno da koto; kaj li alnaĝis la bordon. Kaj jen! kiam li forlavis la koton, sur lia mano kuŝis bela ora ringo; kaj ĝi ekbrilis kaj fajreris en la sunlumo, tiel ke lia koro ĝojis. Sed Smeagolo estis gvatinta lin de malantaŭ arbo, kaj dum Deagolo avide okulumis la ringon, Smeagolo mallaŭte alpaŝis lin deposte.

» — Donu tion, Deagolo, mia kara, — diris Smeagolo trans la ŝultron de l' amiko.

» — Kial? — diris Deagolo.

» — Ĉar hodiaŭ estas mia naskiĝdatreveno, mia kara, kaj mi volas havi ĝin.

» — Al mi ne gravas, — diris Deagolo. — Mi jam donis al vi donacon, pli multekostan ol oportunis al mi. Tion ĉi trovis mi, kaj mi nepre retenas ĝin.

» — Ho, ĉu vere, mia kara, — diris Smeagolo; kaj li kaptis la gorĝon de Deagolo kaj lin strangolis, ĉar la oro aspektis tiel brila kaj bela. Poste li surfingrigis la ringon.

» Neniu iam ajn eltrovis, kio okazis al Deagolo; li estis murdita malproksime de sia hejmo, kaj lia kadavro estis lerte kaŝita. Sed Smeagolo hejmeniris sola; kaj li trovis, ke neniu el la familio povas vidi lin, kiam li portas la ringon. Al li tre plaĉis tiu eltrovo kaj li ĝin kaŝis; kaj li ĝin uzis por elfosi sekretojn, kaj li utiligis ruze kaj malice siajn konojn. Li iĝis akrokula kaj aŭdopreta pri ĉio misefika. La ringo estis doninta al li potencon laŭ lia staturo. Ne mirindas, ke li tre malpopulariĝis kaj estis forpuŝata (kiam videbla) de ĉiuj siaj parencoj. Ili piedbatis lin, kaj li mordis iliajn piedojn. Li komencis ŝteladi, kaj ĉirkaŭiri murmurante al si, kaj gargarante gorĝe. Do ili nomis lin *Golumo*, malbenis lin, kaj diris, ke li foriru malproksimen; kaj lia avino, dezirante trankvilecon, eksigis lin el la familio kaj forpelis lin el sia truo.

» Li vagis izolite, iomete plorante pro la severeco de la mondo, kaj li vojaĝis apud la Rivero, ĝis li alvenis rojon, kiu defluis el la montoj, kaj tiun vojon li sekvis. Li kaptis per nevideblaj fingroj fiŝojn en profundaj lagetoj

kaj manĝis ilin nekuiritajn. Iun tagon estis tre varme, kaj dum li klinis sin al lageto li sentis brulumon ĉe la nuko, kaj blindiga lumo de sur la akvo dolorigis al li la malsekajn okulojn. Li miris pri tio, ĉar pri la suno li preskaŭ forgesis. Poste li suprenrigardis lastfoje kaj skuis kontraŭ ĝi la pugnon.

» Sed mallevante la okulojn, li vidis en malproksimo antaŭ si la vertojn de l' Nebulecaj Montoj, de kiuj fluis la rojo. Kaj li subite ekpensis: "Estus friske kaj ombrece sub tiuj montoj. Tie ne povus gvati min la Suno. La radikoj de tiuj montoj nepre estas veraj radikoj; certe estas valoraj sekretoj tie entombigitaj, kiuj ne estas malkaŝitaj depost la komenciĝo.

» Do li vojaĝis dumnokte ĝis la altaĵoj, kaj li trovis kaverneton, el kiu fluis la malhela rojo; kaj li serpentumis larvece en la sinon de l' monteto, kaj tute forpasis el la konateco. Kun li enombriĝis la Ringo, kaj eĉ ties farinto, kiam denove ekkreskis lia potenco, povis ekscii nenion pri ĝi.

— Golumo! — ekkriis Frodo. — Golumo? ĉu vi volas diri, ke tiu estis ĝuste la Golumo renkontita de Bilbo? Kiel abomene!

— Al mi ŝajnas, ke tio estas historio trista, — diris la sorĉisto, — kaj ĝi povis okazi al aliaj, eĉ al iuj hobitoj konitaj de ni.

— Mi ne povas kredi, ke Golumo parencis kun hobitoj, kiom ajn malproksime, — diris Frodo iom indigne. — Kia koncepto abomena!

— Estas tamen vere, — respondis Gandalfo. — Pri la origino de la hobitoj ĉiuokaze, mi scias pli bone, ol ili mem. Kaj eĉ la rakonto de Bilbo supozigas tiun parencecon. Multo en la fono de iliaj mensoj kaj memoroj estis tre simila. Ili komprenis unu la alian rimarkinde bone, multe pli bone ol hobito komprenus, ekzemple, gnomon, aŭ orkon, aŭ eĉ elfon. Pripensu interalie la enigmojn, kiujn ambaŭ konis.

— Jes, — diris Frodo. — Tamen ne nur hobitoj, sed ankaŭ aliaj starigas enigmojn, relative samspecajn. Kaj hobitoj ne trompas. Golumo la tutan tempon intencis trompi. Li nur klopodis igi Bilbon malsingarda. Kaj supozeble amuzis lian malbonecon komenci ludon, kiu eble en la fino havigus al li facilan viktimon, sed se li perdus, tio ne damaĝus al li.

— Tio nepre veras, bedaŭrinde, — diris Gandalfo. — Sed enestas io alia, al mi ŝajnas, kion vi ankoraŭ ne rimarkas. Eĉ Golumo ne estis komplete ruinigita. Li pruviĝis pli fortika, ol povus antaŭvidi eĉ unu el la Saĝuloj — kio eblus al hobito. Anguleto de lia menso ankoraŭ restis al li, kaj lumo trapasis ĝin, kvazaŭ tra fendeto en la mallumo: lumo el la pasinteco. Estis fakte plezure, mi opinias, aŭdi denove voĉon bonkoran, kiu memorigis pri vento, kaj arboj, kaj sunlumo sur la herbo, kaj tiaj forgesitaĵoj.

» Sed tio, kompreneble, en la fino nur plikolerigis lian malvirtan parton — krom se tiu povus esti venkita. Krom se ĝi povus esti kuracita.

— Gandalfo ĝemspiris. — Ve, tio por li malmulte espereblas. Tamen espero ne komplete mankas. Ne, malgraŭ tio, ke li posedis tiel longe la Ringon, preskaŭ tiel longe, kiel li kapablis memori. Ĉar jam delonge li ne multe portis ĝin: en la nigra mallumo ĝi malofte estis bezonata. Certe li neniam "forvaporiĝis". Li plu maldikas kaj fortikas. Sed la afero konsumis lian menson, kompreneble, kaj la turmento iĝis preskaŭ neelportebla.

» Ĉiuj "grandiozaj sekretoj" sub la montoj montriĝis nenio alia ol malplena nokto: nenio plu eltroveblis, nenio farindis, nur singardaĉa manĝado kaj memorado indigna. Li estis tute mizera. Li malamegis la mallumon, kaj la lumon li eĉ pli malamegis: li malamegis ĉion, kaj antaŭ ĉio la Ringon.

— Kion tio signifas? — diris Frodo. — Ĉu la Ringo ne estis lia sole amata trezorego? Ĉar se li ĝin malamegis, kial li ne malakiris ĝin, aŭ ne foriris postlasante?

— Vi devus ekkompreni, Frodo, post ĉio, kion vi aŭdis, — diris Gandalfo. — Li malamis kaj amis ĝin, kiel li malamis kaj amis sin mem. Li ne povis malakiri ĝin. Restis al li neniom da volforto pri la afero.

» La Ringo Potenca prizorgas sin mem, Frodo. *Ĝi* eble forglitos perfide, sed ĝia posedanto neniam forlasas ĝin. Maksimume li flirtas kun la ideo ĝin transdoni en posedon de iu alia — kaj nur dum frua etapo, kiam ĝi ekkomencas premadi. Sed laŭ mia scio nur Bilbo sola en la historio transpasis flirtadon kaj efektive plenumis tion. Cetere li bezonis mian tutan helpon. Kaj eĉ tiel li neniam estus ĝin forlasinta aŭ flankenĵetinta. Ne estis Golumo, Frodo, sed la Ringo mem, kiu decidiĝis. La Ringo forlasis *lin*.

— Kio, ĝustatempe por renkontiĝi kun Bilbo? — diris Frodo. — Ĉu ne orko pli taŭgus al ĝi?

— Ne estas mokinde, — diris Gandalfo. — Ne viaflanke. Tio estis la plej stranga okazaĵo en la tuta ĝisnuna historio pri la Ringo: la alveno de Bilbo ĝuste tiumomente, kaj lia surmeto de mano al ĝi blinde en la mallumo.

» Prilaboris la aferon pli ol unu potenco, Frodo. La Ringo klopodis reveni al sia mastro. Ĝi forglitis de la mano de Isilduro kaj lin perfidis; poste, kiam prezentiĝis okazo, ĝi kaptis kompatindan Deagolon, kaj tiu estis murdita; kaj post tio Golumon, kaj lin ĝi konsumis. Ĝi ne plu povis utiligi lin: li estis tro eta kaj malvasta; kaj tiel longe, kiel ĝi restis kun li, li neniam plu forlasis sian profundan lageton. Do nun, kiam ĝia mastro revekiĝis kaj dissendis el Mornarbaro sian malhelan penson, ĝi forlasis Golumon. Nur por esti enmanigita de la persono imageble plej malprobabla: Bilbo el la Provinco!

» Malantaŭ tio funkciis io alia, ekster iu ajn plano de la Ringfarinto. Mi

ne povas esprimi tion pli klare, ol diri, ke estis *intencite*, ke la Ringon trovu Bilbo, sed ne ties farinto. Se tiel estas, ankaŭ vi ricevis ĝin *intencite*. Kaj tio eble estas penso kuraĝiga.

— Ne estas tia, — diris Frodo. — Kvankam mi ne certas, ke mi komprenas vin. Sed kiel vi eksciis ĉion ĉi pri la Ringo, kaj pri Golumo? Ĉu vi vere scias ĉion, aŭ vi ankoraŭ konjektas?

Gandalfo rigardis Frodon, kaj liaj okuloj ekfajris.

— Mi sciis multon kaj lernis multon, — li respondis. — Sed mi ne intencas raporti ĉiujn miajn agojn al *vi*. La historio pri Elendilo kaj Isilduro kaj la Unu Ringo estas konata al ĉiuj Saĝuloj. Estas certigite, ke via ringo estas tiu Unu Ringo per la fajrskribado, senkonsidere pri alia atestaĵo.

— Kaj kiam vi eltrovis tion? — interrompis Frodo.

— Ĵus en tiu ĉi ĉambro, kompreneble, — akre respondis la sorĉisto. — Sed mi antaŭvidis trovi ĝin. Mi revenis el malhelaj vojaĝoj kaj longa serĉado por fari tiun finan teston. Ĝi estas la fina pruvo, kaj ĉio jam eĉ tro klaras. Difini la rolon de Golumo kaj plenigi per ĝi la hiaton en la historio postulis iom da pripensado. Povas esti, ke mi komencis per konjektoj pri Golumo, sed mi jam ne plu konjektas. Mi scias. Mi vidis lin.

— Golumon vi vidis? — ekkriis Frodo mirigite.

— Jes. Plej evidenta farindaĵo, kompreneble, se tio eblus. Mi antaŭlonge provis; sed finfine mi sukcesis.

— Do kio okazis, post kiam Bilbo eskapis de li? Ĉu tion vi scias?

— Ne tiel klare. Mi rakontis al vi tion, kion Golumo pretis sciigi — kvankam kompreneble ne tiel, kiel mi ĝin raportis. Golumo estas mensogulo, kaj liajn vortojn oni devas kribri. Ekzemple, li nomis la Ringon sia "naskiĝdata donaco", kaj li obstinis pri tio. Li diris, ke ĝin donis lia avino, kiu posedis multajn similspecajn belaĵojn. Ridinda pretendo. Mi neniel dubas, ke la avino de Smeagolo estis familiestrino, grava persono siamaniere, sed estis absurde diri, ke ŝi posedis multajn elfajn ringojn, kaj se temas pri fordono, tio estas mensogo. Sed mensogo havanta greneron da vero.

» La murdo de Deagolo hantis Golumon, kaj li elpensis defendon, kiun li ripetadis al sia "trezorego", dum li mordadis ostojn en la mallumo, ĝis li preskaŭ kredis ĝin. Estis fakte lia naskiĝtago. Deagolo devis donaci al li la ringon. Ĝi evidente malkaŝiĝis precize por esti donaco. Ĝi estis *fakte* lia naskiĝdata donaco, kaj tiel plu, kaj tiel plu.

» Mi toleris lin laŭeble longe, sed terure gravis la vero, kaj fine mi devis trakti lin severege. Mi timigis lin pri fajro, kaj eltordis el li, iom post iom, la veran historion, kune kun multe da mukado kaj graŭlado. Li kredis sin miskomprenata kaj mistraktata. Sed finfine rakontinte al mi sian historion,

ĝis la fino de l’ enigmoludo kaj la eskapo de Bilbo, li rifuzis diri plu, krom malhelaj aludoj. Ion alian li timis pli profunde ol min. Li murmuris, ke li venĝos sin. Oni vidos, ĉu li tolerus esti piedbatita, kaj pelita en truon, kaj poste *prirabita*. Golumo jam havas bonajn amikojn, amikojn bonajn kaj tre fortajn. Ili helpos lin. Baginzo suferos pro tio. Tio estis lia precipa penso. Li malamis Bilbon kaj malbenis ties nomon. Aldone, li sciis, de kie tiu originis.

— Sed kiel li eltrovis tion? — demandis Frodo.

— Nu, koncerne la nomon, Bilbo tre malsaĝe mem sciigis ĝin al Golumo; kaj post tio ne estus malfacile eltrovi lian landon, kiam Golumo jam elvenis. Ho jes, li elvenis. Lia sopiro pri la Ringo pruviĝis pli forta ol lia timo pri la orkoj, aŭ eĉ pri la lumo. Post unu-du jaroj li forlasis la montaron. Vidu, kvankam lin ankoraŭ influis deziro pri la Ringo, tiu ne plu konsumis lin; li komencis iom reviviĝi. Li sentis sin maljuna, terure maljuna, tamen malpli timema, kaj li morteme malsatis. Lumon, lumon de l’ Suno kaj Luno, li plu timis kaj malamis kaj tio ĉiamos, laŭ mia opinio; sed li estis ruza. Li trovis, ke li povas kaŝiĝi de l’ taglumo kaj lunbrilo, kaj vojaĝi rapide kaj mallaŭte en la senluma nokto per siaj palaj fridaj okuloj, kaj kapti timantajn aŭ malsingardajn kreaĵetojn. Pro l’ freŝa manĝaĵo kaj freŝa aero, li iĝis pli forta kaj riskema. Li trovis la vojon ĝis Mornarbaro, kiel oni atendus.

— Ĉu ĝuste tie vi trovis lin? — demandis Frodo.

— Mi lin vidis tie, — respondis Gandalfo, — sed antaŭ tio li jam malproksimen vagadis, spurante Bilbon. Estis malfacile ekscii ion certan de li, ĉar lian parolon konstante interrompis sakroj kaj minacoj. “Rion ĝi havis en siaj poŝetĉjoj? — li diris. — Mi ne diras, ne, trezorego. Eta trompulo. Ne justa demando. Ĝi la unua trompis, ĝi ja. Ĝi rompis regulojn. Ni devis premadi ĝin, jes trezorego. Kaj ni tion faros, trezorego!”

» Jen specimeno de liaj paroloj. Supozeble vi ne deziras pli. Pro ĝi mi pasigis lacigajn tagojn. Sed pro aludoj metitaj inter la graŭloj mi eksciis, ke liaj plandantaj piedoj finfine portis lin ĝis Esgarodo, kaj eĉ ĝis la stratoj de Dalo, aŭskultantan sekrete kaj gvatantan. Nun, novaĵoj pri gravaj okazaĵoj disvastiĝis larĝe en Sovaĝujo, kaj multaj aŭdis la nomon de Bilbo kaj sciis, de kie li devenis. Ni tute ne kaŝis nian retrovojaĝon al lia hejmo en okcidenton. La akraj oreloj de Golumo certe eksciis baldaŭ tion, kion li volis.

— Kial do li ne daŭrigis spuri Bilbon? — demandis Frodo. — Kial li ne alvenis la Provincon?

— Ha, — diris Gandalfo, — jam, la kerno de l’ afero. Ŝajnas al mi, ke Golumo provis tion fari. Li ekvojaĝis kaj revenis okcidenten, ĝis la Granda

Rivero. Sed tiam li flanken turniĝis. Lin ne timigis la distanco, certe. Ne, io alia lin fortiris. Tion pensas miaj amikoj, tiuj, kiuj elserĉis lin por mi.

» Unue la arbarelfoj spuris lin, tasko al ili facila, ĉar tiam lia spuro ankoraŭ freŝis. Tra Mornarbaro kaj reen ĝi kondukis ilin, kvankam ili neniam atingis lin. La arbaron plenigis onidiroj pri li, teruraj rakontoj eĉ inter bestoj kaj birdoj. La arbaristoj diris, ke vagadas ia nova teruraĵo, fantomo, kiu trinkas sangon. Ĝi grimpis arbojn por trovi nestojn; ĝi rampis en truojn por trovi la idojn; ĝi traglitis fenestrojn por trovi lulilojn.

» Sed okcidentrande de Mornarbaro la spuro forturniĝis. Ĝi forvagis suden kaj forpasis el la kompetento de l' arbaraj elfoj kaj perdiĝis. Kaj tiam mi kulpis eraron. Jes, Frodo, kaj ne la unuan; tamen mi timas, ke ĝi eble montriĝos la plej grava. Mi rezignis pri la afero. Mi lasis lin foriri; ĉar multon mi devis pripensi tiutempe, kaj mi plu fidis Sarumanon.

» Nu, tio okazis antaŭ jaroj. De tiam mi pagis tion per multaj malhelaj kaj danĝeroplenaj tagoj. La spuro jam delonge malvarmiĝis, kiam mi rekomencis la serĉadon, post kiam foriris Bilbo de ĉi tie, kaj mia serĉado estus vana, se ne kunhelpus amiko Aragorno, la plej elstara vojaĝisto kaj ĉasisto en tiu ĉi monda epoko. Kune ni serĉadis Golumon tra la tuta longo de Sovaĝujo, senespere kaj sensukcese. Sed finfine, kiam mi jam rezignis pri la ĉasado kaj iris aliloken, Golumo estis trovita. Mia amiko revenis el grandaj danĝeroj, kuntrenante tiun kreaĵaĉon.

» Kion li faris, li rifuzis diri. Li nur ploris kaj nomis nin kruelaj, kun multe da *golum* en la gorĝo; kaj kiam ni insistadis, li plendaĉis kaj kaŭris, kaj kunfrotis siajn longajn manojn, lekante la fingrojn kvazaŭ li rememorus iun antaŭan torturon. Sed mi timas, ke dubo ne eblis: li vojaĝis laŭ sia malrapida kaŝiĝema maniero, paŝon post paŝo, mejlon post mejlo, suden, ĝis Mordoro.

Peze silentiĝis la ĉambro. Frodo povis aŭdi sian korbatadon. Eĉ ekstere ĉio ŝajnis senmova. Neniel aŭdiĝis jam sono de l' tondilo de Sam.

— Jes, ĝis Mordoro, — diris Gandalfo. — Ve! Mordoro altiras al si ĉiujn malvirtulojn, kaj la Malhela Potenco koncentris sian tutan volforton por kunigi ilin tie. Ankaŭ la Ringo de l' Malamiko certe stampis lin, lasis lin aperta al la alvoko. Kaj ĉiuj personoj tiam flustris pri la nova Ombro en la Sudo, kaj ties malamo al la Okcidento. Tie troveblus liaj bravaj novaj amikoj, kiuj helpus lin pri lia venĝo!

» Mizera stultulo! En tiu lando li povis lerni multon, tro multon por sia bonfarto. Kaj pli aŭ malpli baldaŭ, dum li spionumis kaj gvatis ĉe la limregionoj, oni certe kaptis lin kaj kondukis al enketado. Okazis tiel, mi timas. Kiam oni trovis lin, li jam longe restadis tie, kaj estis elironta. Pro ia fitasko. Sed nun tio ne multe gravas. Lia plej fia tasko jam plenumiĝis.

» Jes, ve! pere de li la Malamiko jam eksciis, ke la Unu estas retrovita. Li scias, kie mortis Isilduro. Li scias, kie Golumo trovis sian ringon. Li scias, ke ĝi ne estas unu el la Tri, ĉar tiuj neniam perdiĝis, kaj ili toleras neniun malvirton. Li scias, ke ĝi ne estas unu el la Sep, aŭ la Naŭ, ĉar ili estas kontrolitaj. Li scias, ke ĝi estas la Unu. Kaj finfine li aŭdis, ŝajnas al mi, pri *hobitoj* kaj la *Provinco*.

» La Provinco — eble li nun serĉas ĝin, se li ne ankoraŭ eltrovis, kie ĝi troviĝas. Efektive, Frodo, mi timas, ke eble li jam pensas, ke la longe ignorita nomo Baginzo fariĝis grava.

— Sed estas terure! — ekkriis Frodo. — Multe pli malbone, ol mi imagis pro viaj aludoj kaj avertoj. Ho Gandalfo, plej bona el amikoj, kion mi faru? Ĉar nun mi vere timas. Kion mi faru? Kiel domaĝe, ke Bilbo ne trapikis tiun fian kreaĵon, kiam li havis okazon!

— Domaĝe? Kompato retenis lian manon. Domaĝo, kaj kompato: ne trapiki senbezone. Kaj li estas bone rekompencita, Frodo. Estu certa, ke lin tiel malmulte misefikis la fieco, kaj fine li eskapis, pro tio, ke tiel li iniciatis sian posedon de la Ringo. Per kompato.

— Mi bedaŭras, — diris Frodo. — Sed mi estas timigita; kaj mi sentas al Golumo neniom da kompato.

— Vi lin ne vidis, — intermetis Gandalfo.

— Ne, kaj tion mi ne deziras, — diris Frodo. — Vian sintenon mi ne komprenas. Ĉu vi volas diri, ke vi kaj la elfoj, permesis, ke li plu vivu post tiuj abomenindaj agoj? Li ĉiuokaze estas nun tiel malvirta kiel orko, kaj nura malamiko. Li meritas morton.

— Jes, meritas. Supozeble vi pravas. Multaj vivantoj meritas morton. Kaj iuj mortantoj meritas vivon. Ĉu tion vi povas aranĝi? Do ne tro entuziasme prijuĝu mortkondamnon. Ĉar eĉ la tre saĝaj ne antaŭvidas ĉiujn celojn. Mi ne multe esperas, ke Golumo estas kuracebla antaŭ ol li mortos, sed ekzistas tia ebleco. Kaj li estas ligita al la sorto de la Ringo. En mia koro sentiĝas, ke li ankoraŭ ludos ian rolon, bonan aŭ malbonan, antaŭ la fino; kaj kiam okazos tio, la kompato de Bilbo eble decidos la sorton de multaj — ne malpleje la vian. Ĉiuokaze, ni lin ne mortigis: li estas tre maljuna kaj tre mizera. La arbarelfoj lin tenas en karcero sed ili traktas lin tiel afable, kiel permesas iliaj saĝaj koroj.

— Tamen, — diris Frodo, — eĉ se Bilbo ne povis mortigi Golumon, mi preferus, ke la Ringon li ne retenus. Mi preferus, se li ĝin ne trovus, kaj se mi ne havus ĝin! Kial vi permesas, ke mi konservu ĝin? Kial vi ne devigis min forĵeti ĝin, aŭ ĝin detrui?

— Permesas al vi? Devigis vin? — diris la sorĉisto. — Ĉu vi ne aŭskultis ĉion, kion mi diris? Vi ne pripensis tion, kion vi diras. Sed koncerne forĵeton, tio evidente estus malprava. Tiuj Ringoj havas emon trovatiĝi. En malvirtaj manoj ĝi eble kaŭzus grandan malbonaĵon. Plej malbone, ĝi eble venus en la manojn de l' Malamiko. Fakte, tio certe okazus; ĉar tiu ĉi estas la Unu, kaj li utiligas sian tutan potencon por trovi ĝin aŭ por altiri ĝin al si.

» Kompreneble, mia kara Frodo, tio estis danĝera al vi; kaj tio min profunde zorgigas. Sed tiom dependis de la afero, ke mi devis iom riski — kvankam, eĉ kiam mi troviĝis malproksime, neniam pasis tago, dum kiu

la Provincon ne gardis atentemaj okuloj. Kondiĉe, se vi ne uzus ĝin, ŝajnis al mi, ke la Ringo neniam daŭre efikus al vi, ne mise, nek ĉiuokaze dum longa tempo. Kaj memorindas, ke antaŭ naŭ jaroj, kiam mi lastfoje vidis vin, mi ankoraŭ ne multon sciis certe.

— Sed kial ne detrui ĝin, kiel laŭ via diro vi devis fari antaŭ longe? — kriis denove Frodo. — Se vi avertus min, aŭ eĉ sendus mesaĝon, mi ĝin forigus.

— Ĉu vere? Kiel vi plenumus tion? Ĉu vi iam provis?

— Ne. Sed mi supozas, ke oni povus marteli aŭ fandi ĝin.

— Provu! — diris Gandalfo. — Provu nun!

Frodo elpoŝigis denove la Ringon kaj rigardis ĝin. Ĝi nun aspektis senornama kaj glata, sen stampo aŭ surskribaĵo videblaj. La oro vidiĝis tre hela kaj pura, kaj Frodo pensis, kiel riĉa kaj bela estis ĝia koloro, kiel perfekta estas ĝia rondeco. Ĝi estis tute admirinda trezorego. Kiam li elpoŝigis ĝin, li intencis forĵeti ĝin en la plej ardan parton de la fajro. Sed nun li konstatis, ke tion li ne kapablas, ne sen granda baraktado. Li pesis la Ringon sur sia mano, hezitante, kaj devigante sin memori ĉion rakontitan de Gandalfo; kaj tiam per granda fortostreĉo li moviĝis, kvazaŭ por ĝin forĵeti — sed li trovis, ke li remetis ĝin en la poŝon.

Gandalfo ridis sengaje.

— Vi vidas? Jam ankaŭ vi, Frodo, ne povas facile liberiĝi de ĝi, nek laŭvole domaĝi al ĝi. Kaj mi ne povus “devigi” vin — krom perforte, kio frakasus vian menson... Sed koncerne rompadon de la Ringo, perforto senutilas. Eĉ se vi prenus ĝin kaj frapegus ĝin per peza martelego, tio eĉ ne difektetus ĝin. Ĝi ne estas malfarebla per viaj manoj, aŭ per miaj.

» Via fajreto, kompreneble, ne fandus eĉ ordinaran oron. Tiu Ringo jam trapasis ĝin netuŝite, kaj eĉ ne varmigite. Sed en tiu ĉi Provinco ne estas forĝejo, kiu kapablus entute ĝin ŝanĝi. Eĉ la ambosoj kaj fornoj de la gnomoj ne kapablus tion. Oni diris, ke drakofajro povus fandi kaj konsumi la Ringojn de Potenco, sed ne plu troviĝas sur la tero drako, en kiu la malnova fajro sufiĉe varmegas; kiel ankaŭ neniam ekzistis drako, eĉ ne Ankalagono la Nigra, kiu kapablis malutili al la Unu Ringo, la Rega Ringo, ĉar tiun kreis Saŭrono mem.

» Ekzistas nur unu rimedo: trovi la Fendaĵojn de l’ Destino en la fundaĵoj de Orodruino, la Fajromonto, kaj enĵeti tien la Ringon, se vi vere volas detrui ĝin, aŭ meti ĝin por ĉiam ekster la atingopovon de l’ Malamiko.

— Mi ja vere volas ĝin detrui! — ekkriis Frodo. — Aŭ, nu, igi ĝin detruita. Mi ne estas kreita por danĝeregaj taskoj. Mi volas, ke neniam mi estus vidinta la Ringon. Kial min ĝi alvenis? Kial min oni elektis?

— Tiaj demandoj estas nerespondeblaj, — diris Gandalfo. — Vi rajtas

certi, ke tio okazis ne pro ia merito ne posedata de aliaj: ĉiuokaze ne pro via potenco aŭ saĝeco. Sed vi estas elektita, kaj sekve vi devas utiligi tiom da forto, koro kaj sprito, kiom vi havas.

— Sed mi havas tiel malmulte da tiu kaj alia! Potenca kaj saĝa estas vi. Ĉu vi ne volas preni la ringon?

— Ne! — ekkriis Gandalfo, salte starigante. — Kun tiu forto mi posedus potencon tro grandan kaj teruran. Kaj super mi la Ringo gajnus potencon eĉ pli grandan kaj pli teruran. — Ekbrilis liaj okuloj, kaj lia vizaĝo eklumis kvazaŭ pro interna fajro. — Ne tentu min! Ĉar mi ne volas iĝi tia, kia la Malhela Mastro mem. La vojo de la Ringo al mia koro estas pere de kompato, kompato al malforteco, kaj de deziro de la fortaj fari bonon. Ne tentu min! Preni ĝin estas por mi neallaseble, eĉ por teni ĝin sendanĝera, neuzata. La deziro utiligi ĝin superos mian forton. Mi tiom bezonos ĝin. Antaŭ mi kuŝas grandaj atencoj.

Li aliris la fenestron kaj flankentiris la kurtenojn kaj ŝutrojn. Sunlumo denove radiis en la ĉambron. Ekstere Sam preterpasis fajfante.

— Kaj nun, — diris la sorĉisto, returnante sin al Frodo, — ĉe vi la decido. Sed mi ĉiam helpos vin. — Li metis sian manon sur la ŝultron de Frodo. — Mi helpos vin porti tiun ĉi ŝarĝon, tiel longe, kiel tio estos via tasko. Sed ion ni devas fari, baldaŭ. La Malamiko moviĝas.

Sekvis longa silento. Gandalfo residiĝis kaj suĉis sian pipon, kvazaŭ enpensiĝinte. Liaj okuloj ŝajnis fermitaj, sed de sub la palpebroj li atente observis Frodon. Frodo fikse rigardis la ruĝan ardaĵon en la fajrujo, ĝis tiu tute okupis lian vidkapablon, kaj li ŝajnis rigardi malsupren en profundajn fajroŝaktojn. Li pensis pri la Fendaĵoj de l' Destino kaj la teruraĵoj de l' Fajromonto.

— Nu, — diris Gandalfo finfine. — Pri kio vi pensas? Ĉu vi decidis, kion fari?

— Ne! — respondis Frodo, rekonsciiĝante post la mallumo, kaj trovante surprizite, ke mallume ne estas, kaj ke tra la fenestro li povas vidi la sunluman ĝardenon. — Aŭ eble jes. Laŭ tio, kion mi komprenas el viaj paroloj, mi supozas, ke la Ringon mi devas reteni kaj gardi, almenaŭ provizore, kion ajn ĝi faros al mi.

— Kion ajn ĝi eble faros, tio okazos lante, lante malutilos, se vi retenos ĝin tiucele, — diris Gandalfo.

— Espereble tiel, — diris Frodo. — Sed mi esperas, ke vi trovos baldaŭ iun alian, pli taŭgan, gardanton. Sed dume ŝajnas, ke mi prezentas danĝeron, danĝeron al ĉiuj proksimloĝantoj. Retenante la Ringon, mi ne povas resti ĉi tie. Mi devus forlasi Bag-Endon, forlasi la Provincon, forlasi ĉion kaj foriri. — Li ĝemspiris. — Mi volas savi la Provincon, se eblus al mi — kvankam

foje mi taksas la loĝantojn neesprimeble tro stultaj kaj malspritaj, kaj sentis, ke tertremo aŭ invado de drakoj tre utilus por ili. Sed tion mi ne plu sentas. Mi sentas, ke tiel longe, kiel kuŝos malantaŭe la Provinco, sekura kaj komforta, mi trovos vagadon pli tolerebla: mi scios, ke ie troviĝas flrma fundamento, eĉ se sur ĝi ne povos stari denove miaj piedoj.

» Kompreneble, mi kelkfoje pensis pri foriro, sed tion mi imagis kiel ian ferion, serion da aventuroj kiel tiuj de Bilbo aŭ pli bonaj kun feliĉa fino. Sed tiu ĉi signifos ekzilon, fuĝon el danĝero en danĝeron, tirante ĝin post min. Kaj supozeble mi devos vojaĝi sola, se plenumi tion kaj savi la Provincon. Sed mi sentas min tre eta, kaj tre elradikigita, kaj nu — timoplena. La Malamiko estas tiel potenca kaj terura.

Tion li ne sciigis al Gandalfo, sed dum li parolis ekflamis en lia koro granda deziro — sekvi Bilbon, kaj eble eĉ lin retrovi. Tiel forta estis tio, ke ĝi venkis lian timon: preskaŭ li estus povinta elkuri ĝuste tiam, kaj poste laŭ la vojo sen sia ĉapelo, kiel faris Bilbo en simila mateno antaŭ longe.

— Mia kara Frodo! — ekkriis Gandalfo. — Hobitoj efektive estas mirindaj kreaĵoj, kiel mi diris pli frue. Eblas lerni dum monato ĉion koneblan pri iliaj moroj, kaj tamen post cent jaroj ili ankoraŭ kapablas surprizi personon dum krizo. Mi apenaŭ atendis tian respondon, eĉ de vi. Sed ne eraris Bilbo, elektante sian heredonton, kvankam li malmulte antaŭvidis, kiom grava tio pruviĝos. Bedaŭrinde vi pravas. Ne longe plu povos la Ringo resti kaŝita en la Provinco; kaj por sekureco de vi kaj de la aliaj, vi devos foriri, kaj lasi malantaŭe la nomon Baginzo. Ne estos sendanĝere havi tiun nomon, ekster la Provinco aŭ en la Sovaĝujo. Nun mi donos al vi vojaĝnomon. Kiam vi foriros, iru kiel sinjoro Submonto.

» Sed ne ŝajnas al mi, ke vi devos iri sola, se vi konas iun fidindan, kiu pretus akompani vin — kaj kiun vi pretus kunpreni al danĝeroj nekonataj. Sed se vi serĉos kunulon, elektu tre singarde! Kaj gardu vin pri la paroloj, eĉ al plej intimaj amikoj! La malamiko havas multajn spionojn kaj multajn rimedojn por aŭskulti.

Subite li eksilentis kvazaŭ aŭskultante. Frodo konsciiĝis, ke ĉio silentis, interne kaj ekstere. Gandalfo paŝis senbrue ĝis la fenestro. Poste li atingis salte la fenestrobreton, kaj etendis eksteren kaj suben sian longan brakon. Aŭdiĝis kriĉo, kaj supreniĝis, tirite per unu orelo, la krispa kapo de Sam Vato.

— Nu, nu, benu mian barbon! — diris Gandalfo. — Sam Vato, ĉu ne? Nu, kion do vi faras?

— Estu vi benita, sinjoro Gandalfo, moŝto! — diris Sam. — Nenion! Fakte mi ĝuste tondis la gazonon sub la fenestro, se vi komprenas min. — Por pravigi sin, li demonstris la heĝan tondilon.

— Mi ne komprenas vin, — diris Gandalfo severe. — Jam de kelka tempo mi ne aŭdis la sonon de via tondilo. Dum kiom da tempo vi orelumis?

— Relumis, sinjoro? Pardonu, mi ne komprenas vin. Mankas lumoj dumtage, evidente.

— Ne stultulumu! Kion vi aŭdis, kaj kial vi aŭskultis? — La okuloj de Gandalfo ekbrilis kaj liaj brovoj hirtiĝis.

— S-ro Frodo, moŝto! — kriis Sam, tremante. — Ne lasu, ke li malutilu al mi, sinjoro! Ne permesu, ke li aliigu min al io nenatura! Mia maljuna paĉjo tiam perturbiĝos. Nenion malbonan mi celis, honorvorte, sinjoro!

— Li ne malutilos al vi, — diris Frodo, apenaŭ ne ridante, kvankam li mem estis surprizita kaj iom perpleksa. — Li scias, tiel bone kiel mi, ke vi celas nenion malbonan. Sed tuj respondu liajn demandojn, senprokraste!

— Nu, sinjoro, — diris Sam, iom ŝancele. — Mi aŭdis multon, kion mi ne tute komprenis, pri malamiko, kaj ringoj, kaj sinjoro Bilbo, sinjoro, kaj drakoj, kaj fajra monto, kaj — kaj elfoj, sinjoro. Mi aŭskultis ĉar mi ne povis malhelpi min, se vi scias, kion mi volas diri. Dio gardu min, sinjoro, sed al mi tre plaĉas tiaj rakontoj. Kaj mi ankaŭ kredas ilin, diru kion ajn Teĉjo. Elfoj, sinjoro! Mi treege ŝatas vidi *ilin*. Ĉu vi povos kunpreni min por vidi elfojn, sinjoro, kiam vi foriros? Subite Gandalfo ridis.

— Envenu! — li kriis, kaj per ambaŭ brakoj li levis la mirigitan Samon, kune kun la tondilo kaj herbtondaĵoj, rekte tra la fenestro, kaj starigis lin sur la plankon. — Kunpreni vin por vidi elfojn, ĉu? — li diris, pririgardante tre atente Samon, sed kun ridetflagro sur la vizaĝo. — Do vi aŭdis, ke foriros sinjoro Frodo?

— Jes fakte, sinjoro. Kaj pro tio mi singultis: kion vi aŭdis verŝajne. Mi klopodis malhelpi tion, sinjoro, sed ĝi eksplodis el mi: mi estis tiom maltrankviligita.

— Nenio farebla, Sam, — diris Frodo malgaje. Li subite konstatis, ke fuĝado el la Provinco signifos disiĝojn pli dolorigajn ol nura adiaŭo al la konataj komfortoj de Bag-Endo. — Mi devos iri. Sed, — kaj tiam li severe rigardis Samon, — se vi vere ŝatas min, vi tenos tion *tute* sekreta. Komprenite? Se ne, se eĉ unu vorton vi elspiros pri tio, kion vi aŭdis ĉi tie, tiam mi esperas, ke Gandalfo aliigos vin al makulita bufo kaj plenigos de kolubroj la ĝardenon.

Sam falis surgenuen, tremante.

— Stariĝu, Sam! — diris Gandalfo. — Mi pripensis ion pli bonan. Ion por fermi vian buŝon, kaj taŭge puni vin pro tio, ke vi aŭskultis. Vi foriros kune kun sinjoro Frodo!

— Mi, sinjoro! — kriis Sam, salte stariĝante kvazaŭ hundo invitita al

promeno. — Mi iros kaj vidos elfojn kaj ĉion! Hura! — li kriegis, kaj poste ekploris.

3

Kunvenas triopo

Vi devus iri kviete, kaj vi devus iri baldaŭ, — diris Gandalfo. Jam pasis du aŭ tri semajnoj, kaj ankoraŭ Frodo montris neniun signon, ke li pretiĝas foriri.

— Mi scias. Sed estas malfacile, fari ambaŭ, — li kontraŭdiris. — Se mi nur malaperos samkiel Bilbo, la sciigo disvastiĝos senprokraste tra la tuta Provinco.

— Kompreneble vi ne devas malaperi! — diris Gandalfo. — Tio tute ne taŭgus! Mi diris *baldaŭ*, ne *abrupte*. Se vi povos elpensi manieron forgliti el la Provinco sen ĝenerala rimarkigo, tio valorigos iomete da prokrasto. Sed nepre ne prokrastu tro longe.

— Ĉu taŭgos aŭtuno, je Nia Naskiĝdato aŭ poste? — demandis Frodo. — Mi pensas, ke ĝis tiam mi kapablos ion aranĝi.

Verdire, li tre malemis komenci nun, kiam tio aktualiĝis. Bag-Endo ŝajnis loĝloko pli dezirinda, ol dum jaroj ĝi ŝajnis, kaj li volis kiom eble frandi sian lastan someron en la Provinco. Kiam venus aŭtuno, li sciis, ke almenaŭ parto de lia koro inkliniĝus pli volonte al vojaĝado, kiel ĝi ĉiam faris dum tiu sezono. Li ja fakte private jam decidiĝis, ke li ekiros en tiu kvindeka naskiĝtago: la cent dudek-oka de Bilbo. Iel tiu ŝajnis la ĝusta tago por ekiri kaj sekvi lin. Sekvado de Bilbo estis ĉefaĵo en lia menso, kaj ĝi sola igis tolerebla la penson pri foriro. Li pensis kiel eble plej malmulte pri la Ringo, kaj kien ĝi eble kondukus lin en la fino. Sed ne ĉiujn siajn pensojn li sciigis al Gandalfo. Kion divenis la sorĉisto, tio estis malfacile konjektebla.

Li rigardis Frodon kaj ridetis.

— Do bone, — li diris. — Verŝajne tio taŭgos — sed nepre ne pli malfrue. Mi maltrankviliĝas. Dume, gardu vin zorge, kaj ne lasu ekesti iun ajn indiketon pri tio, kien vi celas! Kaj certigu, ke ne babilu Sam Vato. Se li babilos, mi ja vere aliigos lin al bufo.

— Koncerne *kien* mi celas, — diris Frodo, — estus malfacile malkaŝi tion. Ĉar ĝis nun eĉ mi mem ne havas klaran koncepton.

— Ne absurdu! — diris Gandalfo. — Mi ne avertas kontraŭ tio, ke vi postlasu adreson en la poŝtoficejo! Sed vi forlasos la Provincon — kaj tion oni ne devus konstati, ĝis vi estos malproksime. Kaj vi devos iri, aŭ

almenaŭ ekiri, norden, suden, okcidenten aŭ orienten — kaj la direkto nepre ne estu konata.

— Min tiel okupis pensoj pri forlaso de Bag-Endo, kaj adiaŭoj, ke mi neniam eĉ pripensis la direkton, — diris Frodo. — Ĉar kien mi iru? Kaj laŭ kio mi navigu? Kio estu mia celo? Bilbo iris trovi trezoron, tien kaj reen; sed mi iros por perdi ĝin kaj ne reveni, se mi bone komprenas.

— Sed vi ne povas kompreni multon, — diris Gandalfo. — Ankaŭ mi ne. Eble estos via tasko trovi la Fendaĵojn de l' Destino; sed eble tiu tasko difiniĝos al aliaj: mi ne scias. Ĉiuokaze, vi ankoraŭ ne pretas por tiu longa vojo.

— Vere ne! — diris Frodo. — Sed intertempe, kien mi celu?

— Al danĝero, sed nek tro bravaĉe, nek tro rekte, — respondis la sorĉisto. — Laŭ mia konsilo, direktu vin al Rivendelo. Tiu vojaĝo ne devus esti tro danĝera, kvankam la Vojo malpli glatas ol antaŭe, kaj ĝi malpliboniĝos kun la velko de la jaro.

— Rivendelo! — diris Frodo. — Tre bone: mi iros orienten, kaj mi direktos min al Rivendelo. Mi kunprenos Samon por viziti elfojn; tio tre plaĉos al li. — Li parolis senĝene; sed lian koron subite plenigis deziro vidi la domon de Elrondo Duonelfa, kaj spiri la aeron de tiu profunda valo, kie loĝis en paco ankoraŭ multaj elfoj.

Iun somervesperon atingis *l' Arbuston Hederan* kaj la *Verdan Drakon* miriga novaĵo. Gigantoj kaj aliaj aŭguraĵoj ĉeborde de l' Provinco estis forgesitaj pro aferoj pli gravaj: s-ro Frodo vendas Bag-Endon, ja fakte jam vendis ĝin — al Retikul-Baginzoj!

— Kontentigapreze, cetere, — diris iuj.

— Kiel bonaĉeton! — diris aliaj, — kaj tio pli probablas, kiam aĉetanto estas sinjorino Lobelia. — (Odo mortis antaŭ kelkaj jaroj, je la matura, sed seniluziiga aĝo de 102). Sed kial vendis s-ro Frodo sian belan truon estis eĉ pli debatinda ol la prezo. Kelkaj teoriumis — subtenite de palpebrumoj kaj aludoj de s-ro Baginzo mem — ke elĉerpiĝis la mono de Frodo: li intencas forlasi Hobiturbon kaj vivteni sin kviete inter siaj brandobokaj parencoj en Boklando per la profito de la vendo. "Laŭeble malproksime de Retikul-Baginzoj", — aldonis iuj. Sed tiel firme fiksita estiĝis koncepto pri la nemezurebla riĉaĵo de Baginzoj de Bag-Endo, ke pli plimultaj taksis tion apenaŭ kredebla, pli nekredebla ol iu ajn alia kialo aŭ fantaziaĵo proponita de ilia imago; al la plejmulto ĝi pensigis pri malhela kaj ankoraŭ ne malkaŝita komploto de Gandalfo. Malgraŭ tio, ke tiu vivis diskrete kaj ne eliris dumtage, estis bone konate, ke li "sin kaŝas en la Bag-Endo". Kvankam ne klaris kiel translokiĝo konvenas al la celoj de lia sorĉado, senduba estis la fakto: Frodo Baginzo estis reironta al Boklando.

— Jes, mi translokiĝos ĉi-aŭtune, — li diris. — Gaja Brandoboko serĉas por mi komfortan trueton, aŭ eventuale dometon.

Fakte, helpe de Gaja, li jam elektis kaj aĉetis dometon en Stretkavo, en la kamparo post Bokelboro. Al ĉiuj krom Sam li ŝajnigis, ke li intencas tie loĝadi definitive. La decido ekiri orienten sugestis al li tiun ideon; ĉar Boklando situis apud la orienta limo de la Provinco, kaj pro tio, ke li loĝis tie infanaĝe, lia reiro estus almenaŭ kredebla.

Gandalfo restis en la Provinco dum pli ol du monatoj. Sed iun vesperon fine de junio, baldaŭ post tiam, kiam fine aranĝiĝis la plano de Frodo, li subite anoncis, ke li denove foriros en la venonta mateno.

— Nur por mallonga tempo, espereble, — li diris. — Mi iros trans la sudan landlimon por akiri novajn informojn, se mi povos. Mi maldiligentis pli longe ol mi devis.

Li parolis senĝene, sed al Frodo ŝajnis, ke li aspektas iom zorga.

— Ĉu okazis io? — li demandis.

— Nu, ne; sed mi aŭdis ion, kio maltrankviligis min kaj bezonas esploron. Se ŝajnos al mi necese, ke finfine vi ekvojaĝu senprokraste, mi tuj revenos aŭ almenaŭ sendos sciigon. Dume restu ĉe via plano; sed estu pli ol iam atentema, precipe pri la Ringo. Permesu emfazi ankoraŭfoje: *ne utiligu ĝin*! Mi revenos tre baldaŭ, — li diris tagiĝe ĉe la foriro. — Plej malfrue mi revenos por la adiaŭa festo. Ŝajnas al mi, ke tamen vi bezonos mian kuneston sur la Vojo.

Komence Frodo estis multe perturbita, kaj ofte scivolis, kion Gandalfo povis aŭdi; sed lia maltrankvilo iom post iom forvaporiĝis, kaj pro la bela vetero li provizore forgesis pri siaj zorgoj. La Provinco malofte spertis someron tiel belan, aŭtunon tiel riĉan: arboj estis pomŝarĝitaj, gutis mielo en la ĉelaroj, kaj tritiko altis kaj plenŝtopiĝis.

Aŭtuno atentinde progresis antaŭ ol Frodo denove komencis zorgi pri Gandalfo. Septembro estis pasanta kaj ankoraŭ ne alvenis novaĵoj pri li. La Naskiĝfesto kaj la transloĝiĝo alproksimiĝis, kaj li daŭre ne venis, nek sendis mesaĝon. Bag-Endo komencis aktiviĝi. Kelkaj amikoj de Frodo venis gaste por helpi lin pri la pakado: inter ili Fredegaro Bolĝero kaj Folko Bofino, kaj kompreneble liaj specialaj amikoj Grinĉjo Tjuko kaj Gaja Brandoboko. Kunlabore ili komplete trabalais la loĝejon.

La 2oan de septembro du kovritaj furgonoj ekiris ŝarĝite al Boklando, transportante al la nova hejmo tiujn meblojn kaj varojn, kiujn Frodo ne vendis, laŭ la vojo al la Brandovina Ponto. La postan tagon Frodo serioze maltrankviliĝis, kaj daŭre atendis Gandalfon. Ĵaŭdo, lia festotago, aŭroris tiel serena kaj kristaleca, kiel estis antaŭlonge por la granda festo de Bilbo. Gandalfo daŭre ne aperis. Vespere Frodo okazigis sian adiaŭan feston: ĝi

estis malgranda, nur vespermanĝo por li kaj liaj kvar helpintoj; sed li estis zorgoplena kaj ne en festa humoro. La penso, ke baldaŭ li devos disiĝi de siaj junaj amikoj pezis sur lian koron. Li konsideris, kiel li anoncos tion al ili.

La kvar pli junaj hobitoj tamen havis viglan humoron, kaj la festo baldaŭ gajiĝis, malgraŭ la foresto de Gandalfo. La manĝoĉambro enhavis nenion krom tablo kaj seĝoj, sed la manĝaĵo estis bonega kaj haveblis bona vino: la vino de Frodo ne estis inkluzivita en la vendo al la Retikul-Baginzoj.

— Kio ajn okazos al miaj ceteraj posedaĵoj, kiam enungigos ilin la Retikul-Baginzoj, ĉiuokaze por tio ĉi mi trovis taŭgan hejmon! — diris Frodo, eltrinkante sian glason. Tio estis la lasta guto de Malnovaj Vinberujoj.

Post kantado de multaj kantoj kaj parolado pri multaj faritaĵoj komunaj, ili tostis la naskiĝfeston de Bilbo, kaj ili trinkis je la sano de li kaj de Frodo kune, laŭ la Froda kutimo. Poste ili eliris por snufi iom da aero kaj ekvido de l' steloj, kaj poste ili enlitiĝis. Finiĝis la festo de Frodo, kaj Gandalfo ne venis.

La postan matenon ili okupiĝis pri pakado de la ceteraj portendaĵoj en alian furgonon. Gaja estris tion, kaj forveturis kun Dikuĉjo (nome Fredegaro Bolĝero).

— Devas iu alveni kaj varmigi la domon antaŭ via alveno, — diris Gaja. — Nu, ĝis revido — postmorgaŭ, se vi ne endormiĝos survoje!

Folko post tagmanĝo hejrnen iris, sed Grinĉjo restis. Frodo estis nervoza kaj ĝenata, vane aŭskultis eventualan sonon de Gandalfo. Li decidis atendi ĝis noktiĝo. Poste, se Gandalfo urĝe bezonus lin, li irus ĝis Stretkavo, kaj eble eĉ venus la unua. Ĉar Frodo piediros. Li planis — pro plezuro kaj lasta pririgardo de la Provinco pli ol alia motivo — marŝi de Hobiturbo ĝis la Pramo de Bokelboro relative malhaste.

— Mi do spertos iom da ekzerciĝo, — li diris, rigardante sin en polvkovrita spegulo en la duonmalplena vestiblo. Jam delonge li ne promenadis energie, kaj aspektis iom molkorpa la spegulaĵo, laŭ lia konstato.

Post tagmanĝo aperis Retikul-Baginzoj: Lobelia kun la rufhara filo Lodo, multe ĝenante Frodon.

— Finfine la nia! — diris Lobelia, enpaŝante. Tio estis nek ĝentila nek absolute vera, ĉar la vendo de Bag-Endo ne efektiviĝos ĝis la noktomezo. Sed al Lobelia eble povas esti pardonate: ŝi devis atendi ĉirkaŭ sepdek sep jarojn pli longe por akiri Bag-Endon, ol ŝi iam esperis, kaj nun ŝi estis centjara. Ĉiuokaze, ŝi venis por kontroli, ke nenio pagita de ŝi estis

forportita; kaj ŝi postulis la ŝlosilojn. Necesis longa tempo por kontentigi ŝin, ĉar ŝi alportis kompletan enhavoliston kaj tute trakontrolis ĝin. Fine ŝi foriris kun Lodo kaj la rezerva ŝlosilo kaj promeso, ke la alian ŝlosilon oni lasos ĉe Vato en Bagŝuta Vico. Ŝi snufegis, kaj klare montris, ke laŭ ŝia opinio la Vatoj plenkapablas elrabi la truon dumnokte. Frodo ne proponis al ŝi eĉ tason da teo.

Li mem temanĝis kun Grinĉjo kaj Sam Vato en la kuirejo. Estis oficiale anoncite, ke Sam iros al Boklando "por servi al s-ro Frodo kaj prizorgi ties ĝardeneton": aranĝo, kiun aprobis la Avulo, kvankam tio ne konsolis lin rilate Lobelian, kiel estontan najbarinon.

— Nia fina manĝo en Bag-Endo! — diris Frodo, retropuŝante sian seĝon. Ili postlasis al Lobelia la lavendaĵon. Grinĉjo kaj Sam ligfermis la tri tornistrojn kaj staplis ilin sur la sojlo. Grinĉjo eliris lastfoje promeni en la ĝardeno. Sam malaperis.

Subiris la suno. Bag-Endo ŝajnis malĝoja, spleneca kaj taŭzita. Frodo travagis la konatajn ĉambrojn, kaj vidis malheliĝi sur la muroj la lumon de l' sunsubiro, kaj ombrojn elrampi el anguloj. Iom post iom mallumiĝis en la domo. Li eliris kaj promenis ĝis la pordeto fine de l' pado, kaj poste iomete plu laŭ la Monteta Vojo. Li dume atendis vidi Gandalfon suprenmarŝanta tra l' krepusko.

Sennubis la ĉielo, kaj la steloj ekbrilis.

— Estos belvetera nokto, — li ekparolis. — Jen bonega komenciĝo. Mi emas marŝi. Mi ne plu toleras prokrastojn. Mi ekiros, kaj Gandalfo devos sekvi min. — Li turnis sin por reiri, kaj poste haltis, ĉar li aŭdis voĉojn ĝuste ĉirkaŭ angulo ĉefine de Bagŝuta Vico. Unu voĉo certe estis de l' maljuna Avulo; la alia estis fremda, kaj iel malagrabla. Li ne povis klare aŭdi, kion ĝi diris, sed la respondojn de la Avulo li aŭdis, kaj ili estis iom akratonaj. La maljunulo ŝajnis ĝenata.

— Ne, s-ro Baginzo foriris. Iris ĉi-matene, kaj kuniris mia Sam: ĉiuokaze iris lia tuta posedaĵo. Jes, ĉion vendis kaj foriris, mi jam diris. Kial? Kialo ne koncernas min, nek vin. Kien? Tio ne estas sekreta. Li translokiĝis al Bokelboro aŭ io tia, tie malproksime. Jes ja, estas kelka distanco. Mi mem neniam iris tiel malproksimen; stranguloj estas en Boklando. Ne, mesaĝon mi ne povos transdoni. Bonan nokton al vi!

Paŝoj forsoniĝis malsupren. Frodo svage scivolis, kial la fakto, ke ili ne venis supren, ŝajnis granda malŝarĝiĝo. "Al mi plensufiĉis demandoj kaj scivolemo pri miaj faroj, supozeble, — li pensis. — Kia aro scivolema!" — Li duonintencis iri demandi la Avulon, kiu la demandinto estis; sed li preferis (aŭ mispreferis) repensi, kaj turninte sin remarŝis rapide al Bag-Endo.

Grinĉjo estis sidanta sur sia tornistro sur la sojlo. Sam ne ĉeestis. Frodo paŝis tra la malluma pordo.

— Sam! — li vokis. — Sam! Jam temp' esta!

— Mi venas, sinjoro! — aŭdiĝis respondo de la fora interno, baldaŭ sekvate de Sam mem, kiu viŝis la buŝon. Li estis adiaŭinta al la bierbarelo en la kelo.

— Ek al la vojo, Sam! — diris Frodo.

— Jes, sinjoro. Mi jam travivos dum kelka tempo, sinjoro. Frodo fermis kaj ŝlosis la rondan pordon, kaj donis la ŝlosilon al Sam.

— Kuru kun tio ĉi ĝis via hejmo, Sam! — li diris. — Poste laŭ la Vico, kaj renkontu nin kiel eble plej baldaŭ ĉe la pordeto al la vojeto post la gresejoj. Ni ne trairos la vilaĝon hodiaŭ nokte. Tro multaj oreloj atentas, okuloj spionas.

Sam forkuris laŭeble rapide.

— Nu, finfine ni ekiras! — diris Frodo. Ili surŝultrigis la tornistrojn, prenis la bastonojn, kaj marŝis ĉirkaŭ la angulon ĝis la okcidenta flanko de Bag-Endo.

— Adiaŭ! — diris Frodo, rigardante la mallumajn fenestrojn. Li flirtigis la manon, kaj poste turniĝis (sekvante Bilbon, sed tion li ne sciis) kaj rapidis post Peregrinon laŭ la ĝardenpado. Ili transsaltis la malaltan heĝobreĉon ĉe la subo kaj eniris la kampojn, forpasante en la mallumon kiel susuro en la herbo.

Sube de la Monteto je la okcidenta flanko ili alvenis la pordeton, kiu malfermiĝis al mallarĝa vojeto. Tie ili haltis kaj alĝustigis la rimenojn de siaj tornistroj. Baldaŭ aperis Sam, trotante rapide kaj peze spirante; lia peza tornistro estis levita alten sur la ŝultrojn, kaj li estis surkapiginta altan senforman sakon feltan, kiun li nomis ĉapelo. En la mallumo li tre similis gnomon.

— Mi estas certa, ke vi donis al mi la plej pezajn ŝarĝaĵojn, — diris Frodo. — Mi kompatas la helikojn, kaj ĉiujn, kiuj portas surdorse la hejmojn.

— Mi povus akcepti ankoraŭ multon, sinjoro. Mia pakaĵo sufiĉe malpezas, — diris Sam brave kaj malvere.

— Tute ne, Sam! — diris Grinĉjo. — Tio utilas al li. Li havas nenion krom tio, kion li ordonis al ni paki. Lastatempe li pigris, kaj li malpli sentos la pezon, kiam li estos forŝvitinta iom el la propra.

— Traktu bonkore kompatindan maljunan hobiton! — ridis Frodo. — Mi estos tiel maldika kiel salika vergo, certe, antaŭ ol atingi Boklandon. Sed mi parolis sensencaĵojn. Mi suspektas, ke vi akceptis pli ol vian justan ŝarĝon, Sam, kaj mi kontrolos tion, kiam ni venontfoje pakos. — Li denove

prenis sian bastonon. — Nu, al ni ĉiuj plaĉas promeni en la mallumo, do ni lasu post ni kelkajn mejlojn antaŭ ol enlitiĝi.

Dum mallonga tempo ili laŭiris okcidenten la vojeton. Poste, lasinte ĝin, ili turniĝis maldekstren kaj kviete surkampiĝis denove. Ili iris spalire laŭ heĝoj kaj boskorandoj, kaj la nokto nigriĝis ĉirkaŭ ili. En siaj malhelaj manteloj ili estis tiel nevideblaj, kvazaŭ ili ĉiuj posedus magiajn ringojn. Ĉar ili estis hobitoj kaj klopodis iri silente, ili faris neniun bruon aŭdeblan eĉ de hobitoj. Eĉ la sovaĝaj bestetoj en la kampoj kaj boskoj apenaŭ rimarkis ilian trapason.

Post kelka tempo ili transiris la Akvon, okcidente de Hobiturbo, laŭ mallarĝa traboponto. La rivereto tie ne estis pli ol serpentumanta nigra rubando, kiun borderis kliniĝantaj alnoj. Ili nun estis en Tjuklando, irante suden, sed post pluaj du-tri mejloj ili transiris la ĉefvojon de Mult-Fosejo al Apudakvo kaj Brandovina Ponto. Tiam ili ekiris sud-orienten kaj komencis supreniri en la Verdmonteta Regiono sube de Hobiturbo. Ili povis vidi glimbriladon de l' vilaĝo sube en la malsovaĝa valo de la Akvo. Baldaŭ tio malaperis en la ondadoj de la mallumigita lando, kaj estis sekvata de Apudakvo ĉe ties griza lageto. Kiam la lumo de la lasta farmdomo estis tre malantaŭe, elgvatante inter arboj, Frodo sin turnis kaj mangestis adiaŭe.

— Mi scivolas, ĉu mi iam ajn denove subenrigardos al tiu valo, — li diris kviete.

Marŝinte dum proksimume tri horoj, ili ripozis. La nokto estis klara, malvarmeta, kaj stelplena, sed fumecaj strioj da nebuleto suprenrampis laŭ la deklivo el la riveretoj kaj profundaj gresejoj. Maldensvestitaj betuloj, svingiĝantaj pro malforta venteto super la kapoj, kreis nigran reton kontraŭ la pala ĉielo. Ili manĝis vespermanĝon tre magran (laŭ hobitaj kriterioj), kaj poste pluiris. Baldaŭ ili trafis mallarĝan vojeton, kiu ŝajnis ondiĝi suprenmalsupren, paliĝante grize en la mallumon antaŭe: la vojo al Arbohalo, Stoko kaj la Bokelbora Pramo. Ĝi supreniris for de la ĉefvojo en la Akvovalo, kaj serpentumis trans la subaĵon de l' Verdaj Montetoj en la direkton de Arbarfino, sovaĝa angulo de Orient-kvarono.

Post kelka tempo ili plonĝis en profunde fenditan trairejon inter altaj arboj, kiuj susurigis siajn sekajn foliojn en la nokto. Estis tre mallume. En la komenco ili interparolis, aŭ zumis mallaŭte melodion kune, jam estante tre malproksimaj de scivolemaj oreloj. Poste ili plumarŝis silente, kaj Grinĉjo komencis iom postresti. Fine, kiam ili komencis supreniri apikan deklivon, li haltis kaj oscedis.

— Mi tiel dormemas, — li diris, — ke baldaŭ mi kolapsos sur la vojon. Ĉu vi intencas dormi surkrure? Estas preskaŭ noktomezo.

— Mi pensis, ke al vi plaĉas nokta promenado, — diris Frodo. — Tamen ne tre urĝas. Gaja atendas nin nur postmorgaŭ; sed tio restigas al ni preskaŭ du tagojn plu. Ni haltos ĉe la plej proksima taŭga loko.

— Ventas el la okcidento, — diris Sam. — Se ni venos aliflanken de tiu ĉi monteto, ni trovos lokon sufiĉe ŝirmatan kaj komfortan, sinjoro. Troviĝas ĝuste antaŭe seka abiarbaro, se mi bone memoras. — Sam konis tre bone la terenon je dudek mejloj de Hobiturbo, sed tio limigis lian geografion.

Ĝuste trans la montetosupro ili alvenis la boskon da abioj. Lasinte la vojon, ili eniris la profundan rezinodoran mallumon de l' arbareto, kaj kunrastis mortajn branĉetojn kaj konusojn por fari fajron. Baldaŭ ili kreis ĝojigan krakadon de flamoj sube de alta abio kaj ili ĉirkaŭsidis ĝin dum kelka tempo, ĝis ili komencis ekdormeti. Tiam, ĉiu en sia angulo de l' grandarbaj radikoj, ili kovris sin per siaj manteloj kaj lankovriloj kaj senprokraste ekdormis. Ili ne starigis vaĉon; eĉ Frodo ankoraŭ ne timis ajnan danĝeron, ĉar ili plu estis en la Provincocentro. Kelkaj kreitaĵoj venis rigardi ilin post estingiĝo de la fajro. Vulpo trapasanta propracele la boskon haltis dum kelkaj minutoj kaj snufis.

— Hobitoj! — ĝi pensis. — Nu, kio ankoraŭ? Mi aŭdis pri strangaj okazaĵoj en tiu ĉi lando, sed malofte mi aŭdis pri hobito, kiu dormis subĉiele kaj sub arbo, des pli pri tri hobitoj! En tio ĉi enestas io vere stranga.

Ĝi tute pravis, sed neniam poste eksciis ion ajn pri la afero.

Venis la mateno, pala kaj humida. Frodo vekiĝis la unua, kaj konstatis, ke arbradiko enpuŝiĝis en lian dorson, kaj ke rigidas lia kolo. "Marŝado plezurcela! Kial do mi ne veturis? — li pensis, kiel li kutime faris komence de ekspedicio. — Kaj ĉiuj miaj belaj plummatracoj estas venditaj al la Retikul-Baginzoj! Tiuj arbradikoj al ili efikus bonfare". Li streĉis sin.

— Vekiĝu, hobitoj! — li kriis. — Estas bela mateno.

— Kiel ĝi belas? — diris Grinĉjo, gvatante unuokule trans la randon de sia lankovrilo. — Sam! Pretigu la matenmanĝon por duono post la naŭa. Ĉu vi jam varmigis la banakvon?

Sam saltstariĝis, iom mukokula.

— Ne, sinjoro, tion mi ne faris, sinjoro! — li diris.

Frodo fortrenis la lankovrilojn desur Grinĉjo kaj rultumis lin, kaj poste foriris ĝis la rando de la bosko. En la fora oriento la suno leviĝis ruĝa el la nebulo, kiu dense kovris la mondon. Tuŝitaj je oro kaj ruĝo la aŭtunaj arboj ŝajnis veli senradike sur ombreca maro. Iom sube kaj maldekstre de li la vojo krute malsupreniris en kavaĵon kaj malaperis.

Kiam li revenis, Sam kaj Grinĉjo jam bruligis belan fajron.

— Akvo! — kriis Grinĉjo. — Kie la akvo?

— Akvon mi ne portas en la poŝoj, — diris Frodo.

— Ni supozis, ke tion vi iris trovi, — diris Grinĉjo, kiu dismetadis manĝaĵon kaj tasojn. — Necesas, ke vi iru nun.

— Ankaŭ vi venu, — diris Frodo, — kaj kunportu ĉiujn akvobotelojn.

Troviĝis rivereto sube de la monteto. Ili plenigis siajn botelojn kaj la etan tendarkaldronon ĉe malgranda akvofalo, kie la akvo falis kelkajn futojn trans elstaraĵon de griza ŝtono. Ĝi estis glacie malvarma; kaj lavante siajn vizaĝojn kaj manojn ili sputetis kaj blovis.

Kiam ili finmanĝis, kaj la tornistroj estis denove rimenitaj, estis jam post la deka horo, kaj la tago komencis beliĝi kaj varmetiĝi. Ili malsupreniris laŭ la deklivo kaj transiris la rivereton tie, kie ĝi plonĝis sub la vojon, kaj supreniris la postan deklivon, kaj supren-malsupren laŭ alia altaĵo de l' montetoj; kaj tiam iliaj manteloj, lankovriloj, akvo, manĝaĵo, kaj ceteraj portaĵoj jam ŝajnis peza ŝarĝo. Ea tuttaga marŝado perspektivis esti laboro varmiga kaj laciga. Post kelkaj mejloj, tamen, la vojo ĉesis ruliĝi supren-malsupren: ĝi atingis la supron de kruta altaĵo laŭ speco de elĉerpita zigzago, kaj poste pretigis sin por lastfoja malsupreniro. Antaŭ si ili vidis la suban terenon trapunktitan de etaj boskoj, kiuj fadiĝis en la foron al bruna arbarloka nebuleto. Ili rigardis trans Arbarfino ĝis Brandovino. La vojo forserpentis antaŭ ili kvazaŭ ŝnuretpeco.

— La vojo daŭras eterne, — diris Grinĉjo, — sed tion ne povas mi sen iom da ripozo. Jam tempo tagmanĝi. — Li sidiĝis sur teron rande de l' vojo kaj rigardis orienten en la nebuleton, post kiu troviĝis la rivero, kaj la limo de la Provinco, en kiu li pasigis sian tutan vivon. Sam staris apude. Liaj rondaj okuloj estis larĝe malfermitaj — li rigardis trans terenon, kiun li neniam vidis, al nova horizonto.

— Ĉu loĝas elfoj en tiuj boskoj? — li demandis.

— Tion mi neniam aŭdis, — diris Grinĉjo. Frodo silentis. Ankaŭ li rigardadis orienten laŭ la vojo, kvazaŭ li neniam antaŭe vidus ĝin. Subite li laŭte ekparolis, tamen kvazaŭ al si mem, dirante malrapide:

La Vojo ĉiam plu pilgrimas
ekde la pordo de l' komenco.
La Vojo jam tre malproksimas,
kaj mi ĝin sekvos, laŭ intenco,
per ritma viglo de l' paŝadoj,
ĝis en vojegon ĝi devias
ĉe l' renkontiĝ' de multaj padoj.
Kaj poste kien? Mi ne scias.

— Tio sonas kiel rimpeco de maljuna Bilbo, — diris Grinĉjo. — Aŭ ĉu ĝi estas unu el viaj imitaĵoj? Ĝi ne sonas tre kuraĝige.

— Mi ne scias, — diris Frodo. — Ĝi venis en mian kapon, kvazaŭ mi kreus ĝin; sed eble mi aŭdis ĝin antaŭe. Ĝi certe tre memorigas min pri Bilbo dum la lastaj jaroj, antaŭ ol li foriris. Li kutimis diri ofte, ke troviĝas nur unu Vojo; ke ĝi similas grandan riveron: ĝiaj fontoj troviĝas apud ĉies sojlo, kaj ĉiu pado estas ĝia elfluaĵo. “Estas danĝere, Frodo, eliri tra via pordo, — li kutimis diri. — Vi surpaŝas la Vojon, kaj se vi ne staras surpiede, oni ne povas scii, kien vi estos forbalaita. Ĉu vi konstatas, ke tiu estas precize la pado, kiu trairas la Mornarbaron, kaj ke, se vi tion permesus, ĝi eble kondukus vin ĝis la Soleca Monto aŭ eĉ pli malproksimen kaj al lokoj pli malagrablaj?” Tion li kutimis diri pri la pado ekster la dompordo ĉe Bag-Endo, precipe post kiam li diste promenadis.

— Nu, min la Vojo nenien ajn forbalaos dum almenaŭ unu horo, — diris Grinĉjo, demetante sian tornistron. La aliaj kopiis lian ekzemplon, demetante siajn tornistrojn sur la teron kaj siajn krurojn elmetante direkte al la vojo. Post ripozo ili bone tagmanĝis kaj poste ripozis iom pli.

La suno komencis subiĝi kaj la posttagmeza lumo kovris la terenon, kiam ili malsupreniris la monteton. Ĝis nun ili renkontis neniun sur la vojo. Tiu vojo ne estis multe uzata, ĉar por ĉaroj ĝi apenaŭ taŭgis, kaj nemulte da trafiko iris al la Arbarfino. Ili amblis denove dum horo aŭ pli, kiam Sam haltis momente por aŭskulti. Ili staris sur tero ebena, kaj la vojo post multa serpentumado kuŝis rekte antaŭe tra herbejo kun disaj altaj arboj, avangardo de arbaro, al kiu ili proksimiĝis.

— Mi aŭdas poneon aŭ ĉevalon, kiu venas sekvante nin laŭ la vojo, — diris Sam.

Ili retrorigardis, sed turniĝo de la vojo malhelpis, ke ili vidu malproksimen.

— Mi scivolas, ĉu tiu estas Gandalfo post ni venanta, — diris Frodo; sed eĉ dirante tion li jam eksentis, ke ne estas tiel, kaj subita emo sin kaŝi for de la vido de l’ rajdanto lin inundis. — Eble tio ne multe gravas, — li diris pardonpetece, — sed mi preferas ne esti vidata survoje — de iu ajn. Jam enuigas min rimarkado kaj diskutado de miaj faroj. Kaj se tiu estas Gandalfo, ni povos lin surprizeti por repagi lian malfruiĝon. Ni malaperu!

La aliaj du kuris rapide maldekstren kaj malsupren en etan kavaĵon proksime de la vojo. Tie ili kuŝiĝis plate. Frodo hezitis dum sekundo: scivolemo aŭ alia sento luktis kontraŭ lia deziro kaŝiĝi. La hufsono pli alproksimiĝis. Ĝustatempe li ĵetiĝis suben en iom da alta herbo malantaŭ arbo, kiu superombris la vojon. Poste li levis la kapon kaj gvatis singarde trans unu el la radikegoj.

De la vojturno venis nigra ĉevalo, neniel hobita poneo sed plenkreskinta ĉevalo; kaj sur ĝi sidis granda viro, kiu ŝajnis kaŭri sur la selo, volvita per

nigra mantelego kaj kapuĉo, tiel ke montriĝis sube nur liaj botoj en la altaj piedingoj; lia vizaĝo estis ombrita kaj nevidebla.

Kiam ĝi atingis la arbon kaj estis antaŭ Frodo, la ĉevalo haltis. La rajdanto sidis tute senmova kun la klinita kapo, kvazaŭ li aŭskultus. De l' interno de la kapuĉo aŭdiĝis brueto kvazaŭ iu snufus por trafi odoron malfortan; la kapo turniĝis de flanko al flanko de la vojo.

Subita neracia timo pri malkaŝiĝo kaptis Frodon, kaj li ekpensis pri sia Ringo. Li apenaŭ riskis spiri, kaj tamen la deziro elpoŝigi ĝin iĝis tiel forta, ke li komencis movi malrapide sian manon. Li sentis, ke necesas nur surfingrigi ĝin, kaj tiam li estos sekura. La konsilo de Gandalfo ŝajnis absurda. Bilbo ja uzis la Ringon. "Kaj mi estas plue en la Provinco", — li pensis, kiam lia mano tuŝis la ĉenon per kiu ĝi pendis. Tiumomente la rajdanto rektiĝis kaj skuis la bridon. La ĉevalo antaŭeniris, unue malrapide, kaj poste ektrotante vigle.

Frodo rampis ĝis la vojrando kaj gvatis la rajdanton, ĝis tiu etiĝis en la malproksimo. Li ne povis esti tute certa, sed ŝajnis al li, ke subite, ĝuste antaŭ ol ĝi malvidiĝis, la ĉevalo flankenturniĝis kaj eniris la arbaron dekstre.

— Nu, tion mi nomas tre stranga kaj efektive perturba, — diris al si Frodo, dum li marŝis al siaj kunuloj. Grinĉjo kaj Sam estis restintaj plataj sur la herbo, kaj vidis nenion; do Frodo priskribis la rajdanton kaj ties strangan agadon.

— Mi ne scias kial, sed mi certas, ke li min serĉis aŭ *flaris*; kaj mi ankaŭ certe ne deziris, ke li malkovru min. Mi neniam antaŭe vidis aŭ sentis similon en la Provinco.

— Sed kiel nin koncernas iu el la granduloj? — diris Grinĉjo. — Kaj kion li volas en tiu ĉi mondparto?

— Troviĝas en la ĉirkaŭaĵo iuj homoj, — diris Frodo. — Ie en Sud-kvarono oni spertis ĝenojn pro granduloj, mi kredas. Sed mi nenion aŭdis pri io simila al tiu rajdanto. Mi scivolas, de kie li venis.

— Pardonpete, — intermetis subite Sam. — Mi scias, de kie li venis. De Hobiturbo venis tiu ĉi nigra rajdanto, krom se ekzistas pli ol unu. Kaj mi scias, kien li iros.

— Kion signifas tio? — diris Frodo abrupte, mire rigardante lin. — Kial vi ne menciis tion pli frue?

— Mi nur ĵus rememoris, sinjoro. Okazis tiele: kiam mi reiris al nia truo hieraŭ vespere kun la ŝlosilo, mia paĉjo diris al mi: "Hola, Sam! — li diris. — Mi supozis, ke vi foriris kun s-ro Frodo hodiaŭ matene. Stranga ulo enketis pri s-ro Baginzo de Bag-Endo, kaj li nur ĵus foriris. Mi plusendis lin al Bokelboro. Tamen ne plaĉis al mi lia parolmaniero. Li ŝajnis ege

malkontenta, kiam mi sciigis al li, ke s-ro Baginzo forlasis por ĉiam sian malnovan hejmon. Siblis al mi, tion li faris. Tio iom tremigis min". — "Kia ulo li estis?" — diris mi al la Avulo. — "Mi ne scias, — li diris, — sed hobito li ne estis. Li estis altstatura kaj nigreca, kaj li alkurbiĝis super mi. Mi konjektas, ke tiu estas unu el la granduloj el fremdujo. Li parolis strangege".

» Mi ne povis resti por aŭdi pli, sinjoro, ĉar vi estis atendanta; kaj mi mem ne multe interesiĝis pri tio. La Avulo maljuniĝas, kaj pli ol iomete blindas, kaj certe estis preskaŭ mallume, kiam tiu ulo supreniris la Monteton kaj trovis lin aerumanta sin ĉe la fino de nia Vico. Mi esperas, ke li faris nenion misan, sinjoro, kiel ankaŭ mi.

— La Avulo ne kulpigindas ĉiuokaze, — diris Frodo. — Efektive mi aŭdis lin paroli al fremdulo, kiu ŝajnis enketi pri mi, kaj mi preskaŭ aliris por demandi kiu li estis. Mi bedaŭras, ke mi tion ne faris, kaj ke vi ne sciigis min pli frue. Eble mi estus pli singarda sur la vojo.

— Tamen, eble nenio ligas tiun ĉi rajdanton al tiu fremdulo, — diris Grinĉjo. — Ni forlasis Hobiturbon sufiĉe sekrete, kaj mi ne konstatas kiamaniere li estus sekvinta nin.

— Kio pri la *flarado*, sinjoro? — diris Sam. — Kaj la Avulo diris, ke li estis ulo nigreca.

— Mi bedaŭras, ke mi ne ĝisatendis Gandalfon, — Frodo murmuris. — Sed eble tio estus malpliboniginta la aferon.

— Do vi konas aŭ divenas ion pri tiu rajdanto? — diris Grinĉjo, kiu aŭdis la vortojn murmuritajn.

— Mi ne konas, kaj mi preferas ne diveni, — diris Frodo.

— En ordo, kuzo Frodo! Vi rajtas konservi vian sekreton dume, se vi emas esti enigma. Intertempe, kion ni faru? Mi ŝatus gluti kaj sorbi iom, sed ial ŝajnas al mi, ke ni prefere formoviĝu. Viaj aludoj al flarantaj rajdantoj kun nevideblaj nazoj min iom perturbis.

— Jes, mi pensas, ke ni pluiru, — diris Frodo, — sed ne laŭ la vojo — pro la ebleco, ke tiu rajdanto revenu, aŭ sekvu lin alia. Ni devus fari paŝegojn plu hodiaŭ. Boklando ankoraŭ mejlojn malproksimas.

La ombroj de la arboj etendiĝis longaj kaj maldikaj sur la herbo, kiam ili ekiris denove. Nun ili iris en distanco de ŝtonĵeto maldekstre de la vojo, kaj restis kiom eble nevideblaj de sur ĝi. Sed tio malhelpis ilin; ĉar la herbo estis densa kaj tufoplena, kaj la tero malebenis, kaj la arboj komencis kunproksimiĝi boske.

La ruĝa suno jam subiris malantaŭ la montetoj dorse de ili, kaj la vespero proksimiĝis, antaŭ ol ili atingis la finon de la longa ebeno, tra kiu la vojo estis rekta. Tiuloke ĝi kurbiĝis iom suden, kaj komencis denove

serpentumi, kiam ĝi eniris arbareton da antikvaj kverkoj.

— Ni iru tien, — diris Frodo.

Proksime de l' vojrando ili alvenis grandegan arbovrakon: ĝi ankoraŭ vivis kaj havis foliojn sur la branĉetoj, kiujn ĝi elmetis ĉirkaŭ la rompitaj stumpoj de siaj longe-falintaj membroj; sed ĝi estis kava, kaj oni povis eniri pere de granda fendo en la flanko forturnita de la vojo. La hobitoj rampis internen, kaj sidiĝis tie sur tavolo el malnovaj folioj kaj putrinta ligno. Ili ripozis kaj manĝetis, parolante mallaŭte kaj de tempo al tempo aŭskultante.

Krepuskis ĉirkaŭ ili, kiam ili denove ŝteliris ĝis la vojo. La okcidenta vento susuris tra la branĉoj. Flustris folioj. Baldaŭ la vojo komencis malabrupte tamen seninterrompe descendi en la krepuskon. Stelo aperis super la arboj en la mallumiĝanta oriento antaŭ ili. Ili marŝis flankalflanke kaj samtakte, por altigi la spiriton. Post kelka tempo, dum la steloj pli densiĝis kaj heliĝis, la maltrankvila sento forlasis ilin, kaj ili ne plu aŭskultis, ĉu aŭdiĝas hufoj. Ili komencis mallaŭte zumkanti, kiel kutimas promenantaj hobitoj, precipe kiam ili proksimiĝas nokte al la hejmo. Ĉe la plimultaj hobitoj tio estas kanto vespermanĝa aŭ enlitiĝa; sed tiuj hobitoj zumis marŝkanton (kvankam, kompreneble, ne sen aludoj al vespermanĝo kaj lito). La vortojn verkis Bilbo Baginzo, laŭ melodio tiel malnova kiel la montetoj, kaj instruis ĝin al Frodo dum ili promenis laŭ la vojetoj de la Akvovalo kaj priparolis la Aventuron.

La fajro en kameno ruĝas,
sub la tegmento lito kuŝas;
sed la piedoj ja ne feblas,
ĉirkaŭ angul' vidiĝi eblas
al stara ŝton' aŭ arb' subita
de sole ni ĝis nun vidita.

Arb', folio, herbo, flor',
pasu for! Pasu for!
Akvo, mont', sub ĉielblu',
preter plu! Preter plu!

Atendas eble post vojorto
trovota pad', sekreta pordo,
kaj se hodiaŭ ni ne trovos,
ja morgaŭ ni reveni povos
kaj laŭ vojetoj iri pele,
al Luno aŭ al Suno cele.

Pomo, dorno, nukso, prun',

iru nun! Iru nun!
Sablo, ŝton’, laget’, irid’,
ĝis revid’! Ĝis revid’!

La hejmo poste, mond’ antaŭe,
tra multaj padoj iri laŭe
en ombroj ĝis la noktorando,
ĝis brilas supre stelgirlando,
kaj mondo poste, hejmo fronte,
reiras mi enlitiĝonte.

Nub’, nebulo, ombroteks’,
iĝos eks! Iĝos eks!
Lampo, manĝo, fajroflam’,
liten jam! Liten jam!

La kanto finiĝis.

— Liten *nun*! Liten *nun*! — kantis Grinĉjo altvoĉe.

— Ĉit! — diris Frodo. — Mi pensas aŭdi hufojn denove.

Ili haltis subite kaj staris silentaj kiel arb-ombroj, aŭskultante. Aŭdiĝis sono de hufoj sur la vojo, iom malantaŭe, sed alvenante malrapide kaj klare laŭ la vento. Rapide kaj kviete ili forlasis la vojon, kaj enkuris la pli profundan ombron sub la kverkoj.

— Ne tro malproksimen! — diris Frodo. — Mi ne volas esti vidata, sed mi volas vidi, ĉu temas pri alia Nigra Rajdanto.

— En ordo! — diris Grinĉjo. — Sed ne forgesu la flaradon! Pliproksimiĝis la hufoj. Mankis al ili tempo por trovi kaŝlokon pli taŭgan ol la ĝenerala mallumo sub la arboj; Sam kaj Grinĉjo kaŭris malantaŭ granda arbotrunko, dum Frodo rerampis kelkajn jardojn al la vojo. Tiu montriĝis griza kaj pala linio de malfortiĝanta lumo tra l’ arbaro. Super ĝi la steloj densis sur la malbrila ĉielo, sed luno ne estis.

La sono de la hufoj ĉesis. Frodo pene ekvidis ion malhelan trapasi la pli helan spacon inter du arboj, kaj poste halti. Ĝi aspektis kiel la nigra ombro de ĉevalo, kiun kondukis nigra ombro pli malgranda. La nigra ombro staris proksime al la loko, kie ili forlasis la vojon, kaj ĝi ŝanceliĝis de flanko al flanko. Al Frodo ŝajnis, ke li aŭdas sonon de snufado. La ombro kliniĝis ĝis la tero, kaj poste komencis rampi en lia direkto.

Ankoraŭfoje inundis Frodon deziro surfingrigi la Ringon; sed ĉi-foje tiu pli fortis ol antaŭe. Tiel fortis ke, preskaŭ antaŭ ol li konstatis la faron, lia mano esploris la poŝon. Sed tiumomente aŭdiĝis miksitaj kantado kaj ridado. Klaraj voĉoj altiĝis kaj subiĝis sur la stelluma aero. La nigra ombro stariĝis kaj forkuris. Ĝi rampis sur la ombrecan ĉevalon kaj ŝajnis malaperi

trans la vojon en la mallumon aliflanke. Frodo suspiris malŝarĝite.

— Elfoj! — eligis Sam per raŭka flustro. — Elfoj, sinjoro! — Li estus elpafinta sin el inter la arboj kaj forkurinta direkte al la voĉoj, se ili ne retenus lin.

— Jes, estas elfoj, — diris Frodo. — Oni foje renkontas ilin en la Arbarfino. Ili ne loĝas en la Provinco, sed ili envagas ĝin printempe kaj aŭtune, el la propraj terenoj de post la Turmontetoj. Mi dankas pro tio! Vi ne vidis, ke tiu Nigra Rajdanto haltis ĝuste ĉi tie kaj efektive rampis niadirekten, kiam komenciĝis la kanto. Tuj kiam li aŭdis la voĉojn, li forŝteliĝis.

— Kio pri la elfoj? — diris Sam, tro ekscitita por zorgi pri la rajdanto. — Ĉu ni povas iri por vidi ilin?

— Aŭskultu! Ili venas ĉi-direkten, — diris Frodo. — Necesas nur atendi apud la vojo.

La kantado proksimiĝis. Unu klara voĉo leviĝis nun super la ceteraj. Ĝi kantis en la bela elfa lingvo, kiun Frodo sciis nur malmulte kaj la aliaj neniom. Tamen la sono harmonianta kun la melodio ŝajnis formiĝi en ilia pensado per vortoj, kiujn ili nur parte komprenis. Jen la kanto, kiel aŭdis ĝin Frodo:

Neĝblankulin'! Ho klara Damol
Reĝin' trans Okcidentaj Maroj!
Lumo al nia vaga klano
en mondo plekta de l' arharoj!

Ho Elberet'! Giltonielo!
Okula klaro, spira helo!
Neĝblankulin'! Al vi ni kantas
en lando, kiun Maro randas.

Ho steloj en Sensuna Jaro,
semaĵ' de ŝia man' lumsenda,
ventkampe nun en hel' kaj klaro
forfalas arbflorar' arĝenta!

Giltoniel'! Ho Elbereto!
Ni tenas en memorposedo,
en jena lando subarbara,
stellumon sur lontano Mara.

Ĉesis la kanto.

— Tiuj estas Altaj Elfoj! Ili elparolis la nomon de Elbereta! — diris Frodo konsternite. — Mi ne sciis, ke iuj el tiu plej bela popolo iam ajn estas

vidataj en la Provinco. Ne multaj nun restas en Mez-Tero, oriente de l' Granda Maro. Jen fakte hazardo stranga!

La hobitoj sidis en apudvoja ombro. Postnelonge la elfoj descendis laŭ la vojo en la valon. Ili preterpasis malrapide, kaj la hobitoj povis vidi la stellumon brili sur iliaj haroj kaj en la okuloj. Ili portis neniajn lumojn, tamen dum ili marŝis, ekglimo, kiel la lunlumo super la rando de la montetoj antaŭ sunleviĝo, ŝajnis ĉirkaŭbrili iliajn piedojn. Ili nun silentis, kaj, kiam la lasta elfo preterpasis, li sin turnis, rigardis direkte al la hobitoj kaj ridis.

— Saluton, Frodo! — li kriis. — Vi eksterdomas malfrue. Aŭ eble vi maltrafis la vojon? — Poste li laŭte alvokis la ceterajn, kaj la tuta kunularo haltis kaj ĉirkaŭstariĝis.

— Jen io vere miriga! — ili diris. — Tri hobitoj en arbaro dumnokte! Ion similan ni ne vidis, post kiam Bilbo foriris. Kion signifas tio ĉi?

— Tio signifas, beluloj, — diris Frodo, — simple, ke ni ŝajne sekvas la saman vojon kiel vi. Al mi plaĉas promeni sub la steloj. Sed mi bonvenigus vian societon.

— Sed ni ne bezonas alian societon, kaj hobitoj estas tiel malspritaj, — ili ridis. — Kaj kiel vi scias, ke ni iras la saman vojon kiel vi, ĉar vi ne scias, kien ni celas?

— Kaj kiel vi konas mian nomon? — demandis Frodo reciproke.

— Multajn aferojn ni konas, — ili diris. — Ni ofte vidis vin antaŭe kun Bilbo, kvankam vi eble ne rimarkis nin.

— Kiuj vi estas, kaj kiu estas via estro? — demandis Frodo.

— Mi estas Gildoro, — respondis ilia estro, tiu elfo, kiu unue alvokis lin. — Gildoro Ingloriono el la Familio Finroda. Ni estas ekzilitoj, kaj plimultaj niaj parencoj jam delonge foriris, ankaŭ ni restos ci tie nur mallonge, antaŭ ol reiri trans la Grandan Maron. Sed kelkaj niaj parencoj daŭre loĝas pace en Rivendelo. Bonvolu, Frodo, rakonti, kion vi faras? Ĉar ni vidas, ke ombras vin la timo.

— Ho Saĝa Popolo! — interrompis Grinĉjo sciavide. — Klarigu al ni pri la Nigraj Rajdantoj!

— Ĉu Nigraj Rajdantoj? — ili diris malaltvoĉe. — Kial do vi demandas pri Nigraj Rajdantoj?

— Ĉar du Nigraj Rajdantoj hodiaŭ nin preterpasis, aŭ unu faris tion dufoje, — diris Grinĉjo, — nur antaŭ nelonge li forŝteliĝis, kiam vi proksimiĝis.

La elfoj ne tuj respondis, sed mallaŭte interparolis propralingve. Finfine Gildoro sin turnis al la hobitoj.

— Ni ne parolos pri tio en tiu ĉi loko, — li diris. — Ni opinias, ke vi prefere akompanu nin nun. Ne estas nia kutimo, sed ĉi-foje ni kondukos vin

laŭ nia vojo, kaj vi restos kun ni hodiaŭ nokte, se vi volas.

— Ho, Beluloj! Jen bona fortuno super miaj esperoj, — diris Grinĉjo. Al Sam mankis vortoj.

— Mi dankas vin tre sincere, Gildoro Ingloriono, — diris Frodo riverencante. — *Elen síla lúmenn' omentielvo*: stelo lumigas la horon de nia renkontiĝo, — li aldonis, per la alta elfa lingvo.

— Estu singardaj, amikoj! — ekkriis Gildoro, ridante. — Ne diru sekretojn! Jen klerulo pri la Antikva Lingvo. Bilbo estis bona instruanto. Saluton, elf-amiko! — li diris, riverencante al Frodo. — Venu jam kun viaj amikoj kaj aliĝu al nia rondo! Prefere marŝu en la mezo, ke vi ne forvagu. Vi eble laciĝos antaŭ ol ni haltos.

— Kial? Kien vi iros? — demandis Frodo.

— Por la hodiaŭa nokto ni iros al la arbareto surla montetoj super Arbohalo. Temas pri pluraj mejloj, sed ĉe la fino vi povos ripozi; kaj tio mallongigos vian morgaŭan marŝon.

Nun ili marŝis plu en silento, kaj pasis kvazaŭ ombroj aŭ malhelaj lumoj: ĉar elfoj (eĉ pli ol hobitoj) kapablis marŝi, kiam ili tion volis, sen sonoj aŭ piedbruo. Grinĉjo baldaŭ eksentis dormemon, kaj ŝanceliĝis unu-dufoje; sed ĉiufoje altstatura elfo ĉeflanke elmetis brakon kaj malhelpis, ke li falu. Sam marŝadis flanke de Frodo, kvazaŭ sonĝante, kaj kun vizaĝesprimo duone tima kaj duone subpremite ĝoja.

Plidensiĝis la arbaro ambaŭflanke; jam la arboj estis pli junaj kaj pli densaj; kaj dum la vojo malsupreniris, kondukante suben en faldaĵon de la montetoj, troviĝis multaj profundaj boskoj da avelarboj sur la deklivoj supreniĝantaj ambaŭflanke. Finfine la elfoj forturniĝis de la vojo. Verda rajdejo kuŝis preskaŭ nevidebla tra la densejo dekstre; kaj tiun ili sekvis dum ĝi serpentumis supren denove laŭ la arbarkovritaj deklivoj sur la supron de montetoŝultro, kiu elstaris sur la plisuba tereno de la rivera valo. Subite ili eliris el la ombro de la arboj, kaj antaŭ ili etendiĝis larĝa herbejo, griza en la noktmallumo. Je tri flankoj la arbaro ĝin alpremis; sed oriente la tero subiris abrupte kaj la suproj de l' malhelaj arboj, kiuj kreskis je la fundo, troviĝis sub iliaj piedoj. Poste la malaltejo kuŝis malklara kaj ebena sub la steloj. Pli proksime ekbrilis kelkaj lumoj en la vilaĝo Arbohalo.

La elfoj sidiĝis sur la herbon kaj interparolis per mallaŭtaj voĉoj; ili ŝajne ne plu atentis la hobitojn. Frodo kaj liaj kunuloj volvis sin per manteloj kaj lankovriloj, kaj dormemo ilin alŝteliris. La nokto pliprofundiĝis, kaj estingiĝis la lumoj en la valo. Grinĉjo ekdormis, kusenata de verda terbuleto.

Alte en oriento svingiĝis Remirado, la Stela Reto, kaj super la nebuloj malrapide leviĝis ruĝa Borgilo, ardante kiel fajrjuvelo. Poste, pro ia moviĝo

de l’ aero la tuta nebulo estis fortirita kvazaŭ vualo, kaj suprenkliniĝis, dum li rampis trans la randon de la mondo, la Glavportanto de l’ Ĉielo, Menelvagro kun sia brila zono. La elfoj ekkantis. Subite sub la arboj ekbrulis fajro kun ruĝa lumo.

— Venu! — la elfoj alvokis la hobitojn. — Venu! Jam temp’ esta por paroloj kaj gajeco!

Grinĉjo eksidis kaj frotis la okulojn. Li tremis.

— Troviĝas fajro en la halo, kaj manĝaĵo por malsataj gastoj, — diris elfo staranta antaŭ li.

Ĉe la suda rando de l’ herbejo troviĝis malfermitejo. Tie la verda planko eniris la arbaron, kaj formis larĝan spacon kvazaŭ halon, tegmentitan per branĉoj de la arboj. Ties grandaj trunkoj etendiĝis pilastre laŭ ambaŭ flankoj. Meze flamis lignofajro, kaj sur la arboj-pilastroj brulis senŝancele torĉoj kun oraj kaj arĝentaj lumoj. La elfoj sidis ĉirkaŭ la fajro sur la herbo aŭ sur la segitaj stumpoj de malnovaj trunkoj. Iuj iris tien-reen portante kruĉojn kaj verŝante trinkaĵojn; aliaj alportis manĝaĵojn sur plenplenaj pladoj kaj ujoj.

— Tio ĉi estas nutraĵo nealloga, — ili diris al la hobito, — ĉar ni loĝas en la arbaro malproksime de niaj haloj. Se iam vi estos niaj gastoj hejme, ni traktos vin pli taŭge.

— Tio ĉi ŝajnas al mi sufiĉe taŭga por naskiĝfesto, — diris Frodo. Grinĉjo poste memoris malmulton ĉu pri la manĝaĵo ĉu la trinkaĵo, ĉar lian menson plenigis la lumo sur la elfaj vizaĝoj, kaj la sono de voĉoj tiel variaj kaj tiel belaj, ke li sentis sin en maldorma sonĝo. Sed li memoris, ke troviĝis pano, kiu superis la guston de bela blanka pano proponita al malsatmortonto, kaj fruktoj dolĉaj kiel sovaĝaj beroj kaj pli riĉaj ol kultivitaj ĝardenfruktoj; li eltrinkis tason, kiun plenigis bonodora likvaĵo, malvarmeta kiel monta rivereto, ora kiel somera posttagmezo.

Sam neniam povis vorte priskribi, nek klare bildigi al si tion, kion li sentis aŭ pensis tiunokte, kvankam ĝi restis en lia memoro kiel unu el la ĉefaj travivaĵoj de lia vivo. Plej proksimume li tion foje esprimis: “Nu, sinjoro, se mi povus kreskigi tiajn pomojn, mi nomus min ĝardenisto. Sed ĝuste la kantado trafis mian koron, se vi min komprenas”.

Frodo sidis, ĝoje manĝante, trinkante, kaj parolante; sed lia menso atentis ĉefe la vortojn parolatajn. Li scipovis iomete la elfan lingvon kaj aŭskultis entuziasme. De tempo al tempo li alparolis tiujn, kiuj priservis lin kaj dankis ilin per ilia lingvo. Ili ridetis al li kaj diris ridante: “Jen juvelo el inter hobitoj!”

Post kelka tempo Grinĉjo ekdormis profunde, kaj oni levis lin kaj forportis al laŭbo sub la arboj; tie oni kuŝigis lin sur molan liton, kaj li

fordormis la ceteron de la nokto. Sam rifuzis forlasi sian mastton. Post la foriro de Grinĉjo, li kurbiĝis apud la piedoj de Frodo, kie finfine li kapklinis kaj fermis siajn okulojn. Frodo dumlonge restis maldorma, interparolante kun Gildoro.

Pri multaj aferoj ili parolis, malnovaj kaj novaj, kaj Frodo starigis al Gildoro multajn demandojn pri okazaĵoj en la vasta mondo ekster la Provinco. La informoj estis plejparte malgajaj kaj minacaj: pri proksimiĝanta mallumo, la militoj de homoj, kaj forfuĝo de la elfoj. Fine Frodo starigis la demandon plej intiman al sia koro:

— Diru al mi, Gildoro, ĉu vi iam vidis Bilbon, post kiam li forlasis nin?

— Jes, — Gildoro ridetis — Dufoje. Li adiaŭis nin ĝuste en tiu ĉi loko. Sed mi revidis lin unu fojon, malproksime de tie ĉi. — Li volis nenion pli diri pri Bilbo, kaj Frodo eksilentis.

— Vi ne multe demandas aŭ rakontas al mi pri tio, kio koncernas vin, Frodo, — diris Gildoro. — Sed mi jam scias iomete, kaj pli mi povas legi sur via vizaĝo kaj en la pensado malantaŭ viaj demandoj. Vi forlasas la Provincon, kaj tamen vi dubas, ĉu vi trovos tion, kion vi serĉas, aŭ plenumos tion, kion vi intencas, aŭ ke vi iam revenos. Ĉu ne vere?

— Vere, — diris Frodo; — sed mi supozis, ke mia foriro estas sekreto konata nur al Gandalfo kaj mia fidela Sam. — Li subenrigardis al Sam, kiu ronketis.

— Tiu sekreto ne atingos per ni la Malamikon, — diris Gildoro.

— La Malamikon? — diris Frodo. — Do vi scias, kial ni forlasas la Provincon?

— Mi ne scias, kial la Malamiko persekutas vin, — respondis Gildoro, — sed tion mi konstatas — malgraŭ, ke tio ŝajnas al mi stranga. Kaj mi avertas vin, ke danĝero troviĝas nun antaŭ vi kaj malantaŭ vi, kaj ambaŭflanke.

— Vi aludas la Rajdantojn? Mi timis, ke ili estas servantoj de la Malamiko. Kio *estas* la Nigraj Rajdantoj?

— Ĉu Gandalfo nenion diris al vi?

— Nenion pri tiaj kreitaĵoj.

— Do mi opinias, ke ne konvenas al mi diri pli — por ke teruro ne malhelpu vian vojaĝon. Ĉar al mi ŝajnas, ke vi sukcesis ekiri ĝustatempe, se vi fakte sukcesis. Vi devas nun rapidegi, kaj nek resti, nek retroiri; ĉar la Provinco ne plu protektas vin.

— Mi ne povas imagi, kiaj informoj estus pli timigaj ol viaj aludoj kaj avertoj, — ekkriis Frodo. — Mi sciis, kompreneble, ke danĝero kuŝas antaŭe, sed mi ne atendis renkonti ĝin en nia propra Provinco. Ĉu ne povas hobito pace marŝi ekde la Akvo ĝis la Rivero?

— Sed ne temas pri via propra Provinco, — diris Gildoro. — Aliaj loĝis ĉi tie antaŭ ol hobitoj estis; kaj aliaj loĝos denove ĉi tie, kiam hobitoj ne plu estos. Ĉirkaŭas vin la vasta mondo: vi povas enbarili vin, sed vi ne povas por ĉiam ĝin elbarili.

— Mi scias, kaj tamen ĝi ĉiam ŝajnis tiel sekura kaj intima. Kion mi nun povas fari? Mia plano estis, forlasi sekrete la Provincon, kaj iri al Rivendelo; sed jam miaj paŝoj estas sekvataj, eĉ antaŭ ol mi venis en Boklandon.

— Laŭ mia opinio vi devus daŭrigi tiun planon, — diris Gildoro. — Mi ne supozas, ke la Vojo pruviĝos tro malfacila porvia kuraĝo. Sed se vi deziras konsilon pli klaran, vi devus demandi Gandalfon. Mi ne konas la kialon de via fuĝo, kaj sekve mi ne scias, kiamaniere viaj persekutantoj atakos vin. Tiujn aferojn Gandalfo certe scias. Mi supozas, ke vi vidos lin antaŭ ol forlasi la Provincon?

— Mi esperas, ke jes. Sed tio estas alia afero, kiu maltrankviligas min. Mi jam de multaj tagoj atendis Gandalfon. Li devis alveni Hobiturbon plej malfrue antaŭ du noktoj; sed li ne aperis. Nun mi scivolas, kio povis okazi. Ĉu mi devus lin atendi?

Gildoro silentis momente.

— Ne plaĉas al mi tiu ĉi sciigo, — li diris finfine. — La malfruo de Gandalfo ne bone aŭguras. Sed estas dirite: “Ne enmiksiĝu en sorĉistajn aferojn, ĉar ili estas subtilaj kaj ekkoleriĝemaj”. Al vi la elekto: ĉu iri aŭ atendi.

— Kaj estas dirite krome, — respondis Frodo: “Ne serĉu konsilon ĉe la elfoj, ĉar ili diros kaj jes kaj ne”.

— Ĉu vere? — ridis Gildoro. — Elfoj malofte donas senŝirman konsilon, ĉar konsilo estas donaco danĝera, eĉ de saĝulo al saĝulo, kaj ĉiuj vojoj kapablas konduki mise. Sed kion vi volas? Vi ne sciigis al mi ĉion pri vi; kiel do mi elektu pli trafe ol vi? Sed se vi postulas konsilon, mi ĝin donos pro amikeco. Mi pensas, ke vi devas iri tuj, senprokraste; kaj se Gandalfo ne venos antaŭ via foriro, mi konsilas ankaŭ jenon: ne iru sola. Kunigu amikojn, kiuj estas fidindaj kaj volpretaj. Nun vi devus danki, ĉar tiun konsilon mi ne donas ĝoje. La elfoj havas proprajn laborojn kaj proprajn dolorojn, kaj malmulte koncernas ilin la faroj de hobitoj, aŭ de iuj aliaj kreaĵoj sur la tero. Malofte niaj vojoj renkontas iliajn, ĉu hazarde ĉu intence. En tiu ĉi renkontiĝo eble estas pli ol hazardo; sed la intenco ne klaras al mi, kaj mi timas diri tro multe.

— Mi profunde dankas, — diris Frodo, — sed mi ŝatus, ke vi diru al mi klare, kio estas la Nigraj Rajdantoj. Se mi akceptos vian konsilon, mi eble ne vidos Gandalfon longe, kaj mi devos scii, kio estas la danĝero, kiu persekutas min.

— Ĉu ne sufiĉas scii, ke ili estas servantoj de la Malamiko? — respondis Gildoro. — Fuĝu de ili! Neniun vorton elparolu al ili! Ili estas senkompataj. Nenion pli demandu al mi! Sed mia koro avertas, ke antaŭ ol ĉio finiĝos, vi, Frodo, filo de Drogo, scios pri tiuj mallumaj aferoj pli ol Gildoro Ingloriono. Elbereta protektu vin!

— Sed kie mi trovos la kuraĝon? — demandis Frodo. — Tion mi ĉefe bezonas.

— Kuraĝon oni trovas en lokoj malprobablaj, — diris Gildoro. — Esperu optimisme! Dormu jam! Matene ni estos foririntaj; sed ni sendos niajn mesaĝojn tra la landoj. La Vagantaj Kunularoj ekscios pri via vojaĝo, kaj tiuj, kiuj potencas por la bono, vaĉos. Mi nomas vin elf-amiko; kaj la steloj lumigu la finon de via vojo! Malofte ni tiel plezuriĝis je fremduloj, kaj estas agrable aŭdi vortojn de l’ Antikva Parolo el la lipoj de aliaj vagantoj en la mondo.

Frodo sentis, ke dormo ekkaptas lin, ĝuste dum Gildoro ĉesis paroli.

— Mi dormos nun, — li diris, kaj la elfo kondukis lin ĝis laŭbo apud Grinĉjo, kaj li sinĵetis sur liton kaj tuj eniris sensonĝan dormon.

4

Rapidpado ĝis agarikoj

Matene Frodo vekiĝis refreŝigita. Li estis kuŝanta en laŭbo farita el vivanta arbo kun branĉoj plektitaj kaj atingantaj la teron; lia lito estis el filikoj kaj herboj, profunda kaj mola kaj strange bonodora. La suno trabrilis tremetantajn foliojn, kiuj ankoraŭ verdis sur la arbo. Li saltleviĝis kaj eliris.

Sam estis sidanta sur la herbo proksime al la arborando. Grinĉjo staris studante la ĉielon kaj la veteron. Neniu indiko pri elfoj vidiĝis.

— Ili postlasis por ni fruktojn kaj trinkaĵon, kaj panon, — diris Grinĉjo. — Venu matenmanĝi. La pano gustas preskaŭ tiel bone kiel hieraŭ vespere. Mi ne volis lasi por vi porcion, sed Sam insistis.

Frodo sidiĝis apud Sam kaj ekmanĝis.

— Kia plano por hodiaŭ? — demandis Grinĉjo.

— Marŝi ĝis Bokelboro laŭeble rapide, — respondis Frodo, kaj turnis sian atenton al la manĝaĵoj.

— Ĉu vi supozas, ke ni vidos iujn el tiuj Rajdantoj? — demandis Grinĉjo gaje. Sub la matena suno la ebleco vidi tutan trupon da ili ne ŝajnis al li tre timiga.

— Jes, probable, — diris Frodo, al kiu ne plaĉis la memorigo. — Sed mi esperas transiri la riveron sen tio, ke ili vidu nin.

— Ĉu vi eltrovis ion pri ili de Gildoro?

— Ne multon — nur aludojn kaj enigmojn, — diris Frodo eviteme.

— Ĉu vi demandis pri la snufado?

— Tion ni ne diskutis, — diris Frodo tra plena buŝo.

— Vi devis. Mi certas, ke tio estas grava.

— Tiuokaze mi certas, ke Gildoro rifuzus klarigi ĝin, — diris Frodo akre. — Kaj nun iom lasu min trankvila! Mi ne volas respondi aron da demandoj dum mi manĝas. Mi volas pensi!

— Bona ĉielo! — diris Grinĉjo. — ĉe matenmanĝo? — Li foriris randen de la verdaĵo.

El la menso de Frodo la hela mateno — perfideme hela, li pensis — ne estis foriginta timon pri persekuto; kaj li meditis pri la vortoj de Gildoro. La gaja voĉo de Grinĉjo aŭdiĝis al li. Tiu kuradis sur la verda gresaĵo kaj kantis.

— Ne, tion mi ne povus! — li pensis en si. — Unu afero estas

promenigi miajn junajn amikojn kun mi tra la Provinco, ĝis ni nur iomete malsatas kaj lacas, kaj manĝado kaj lito estas dolĉaj. Marŝigi ilin en ekzilon, kie laco kaj malsato eble ne estas kuraceblaj, estas alia afero — eĉ se ili laŭvole pretus kuniri. La heredaĵo estas sole mia. Al mi ŝajnas, ke eĉ Samon mi ne devus kunirigi. — Li rigardis al Sam Vato, kaj konstatis, ke Sam rigardadas lin.

— Nu, Sam! — li diris. — Kion fari? Mi forlasos la Provincon kiel eble plej baldaŭ — fakte mi nun decidiĝis eĉ ne unu tagon resti en Stretkavo, se tio eblos.

— Tre bone, sinjoro!

— Vi ankoraŭ intencas akompani min?

— Efektive.

— Estos tre danĝere, Sam. Estas jam tre danĝere. Tre verŝajne neniu el ni revenos.

— Se ne revenos vi, sinjoro, do ne revenos mi, estas certe, — diris Sam. — "Ne forlasu lin!" ili diris al mi. "Lasu lin! — mi diris. — Tion mi neniam intencis. Mi iros kun li, se li grimpos ĝis la Luno; kaj se iuj el tiuj Nigraj Rajdantoj provos malhelpi lin, ili devos enkalkuli Samon Vato", mi diris. Ili ridis.

— Kiuj estas *ili*, kaj pri kio vi parolas?

— La elfoj, sinjoro. Ni iom interparolis hieraŭ vespere; kaj ili ŝajnis scii, ke vi foriros, do mi ne vidis motivon tion nei. Mirindaj kreaĵoj, elfoj, sinjoro! Mirindaj!

— Efektive, — diris Frodo. — Ĉu vi ankoraŭ ŝatas ilin nun, kiam vi pli proksime vidis ilin?

— Ili ŝajnas iom superaj al miaj ŝatoj-malŝatoj, por tiel diri, — respondis Sam malrapide. — Ŝajnas negrava, kion mi opinias pri ili. Ili tute malsimilas tion, kion mi atendis — tiel junaj-maljunaj, kaj tiel gajaj-malgajaj, ĉu ne.

Frodo rigardis Samon iom surprizite, duone atendante vidi ian eksteran signon pri la stranga ŝanĝiĝo, kiu ŝajne okazis al li. Tio ne sonis kiel la voĉo de l' malnova Sam Vato, kiun li supozis koni. Sed la sidanto aspektis kiel la malnova Sam Vato, krom ke lia vizaĝo estis nekutime pensema.

— Ĉu vi nun sentas bezonon forlasi la Provincon — nun, kiam via deziro vidi ilin realiĝis? — li demandis.

— Jes, sinjoro. Mi ne scias, kiel tion esprimi, sed depost la hieraŭa nokto mi sentas min alia. Mi ŝajnas vidi antaŭen, iele. Mi scias, ke ni sekvos tre longan vojon en mallumon; sed mi scias, ke mi ne povas retroturniĝi. Ne vidi elfojn nun, nek drakojn, nek montojn, mi jam volas — mi ne scias precize, kion mi volas: sed ion mi devas fari antaŭ la fino, kaj tio kuŝas

antaŭe, ne en la Provinco. Mi devas ĝisfini ĝin, sinjoro, se vi min komprenas.

— Mi ne tute komprenas. Sed mi komprenas, ke Gandalfo elektis por mi taŭgan kunulon. Mi estas kontenta. Ni iros kune.

Frodo finmanĝis silente. Poste, stariĝinte, li trarigardis la terenon antaŭe kaj vokis Grinĉjon.

— Ĉu preta ekiri? — li diris, kiam Grinĉjo alkuris. — Ni devas tuj ekmarŝi. Ni dormis ĝis malfrue, kaj restas sufiĉe multaj mejloj trairotaj.

— Dormis ĝis malfrue *vi*, vi volas diri, — diris Grinĉjo. — Mi leviĝis longe antaŭe; kaj ni nur atendis, ke vi finu manĝadon kaj pensadon.

— Ambaŭ jam estas finitaj. Kaj mi celos al Bokelbora Pramo laŭeble rapide. Mi ne devios reen al la vojo, kiun ni forlasis hieraŭ nokte: mi iros rekte de ĉi tie trans la terenon.

— Do vi intencas flugi, — diris Grinĉjo. — Vi ne iros rekte ien ajn en tiu ĉi tereno.

— Ni povas ĉiuokaze iri pli rekte ol la vojo, — respondis Frodo. — La Pramo troviĝas sud-oriente de Arbohalo, sed la vojo kurbiĝas maldekstren — videblas kurbo ĝia tie fornorde. Ĝi ĉirkaŭiras la nordan randon de Mariŝo por trafi la ŝoseon de la Ponto super Stoko. Sed tio kondukas mejlojn el la vojo. Ni ŝparus kvaronon de la distanco, se ni celus al la Pramo de la loko, sur kiu ni staras.

— *Pro rapidpadoj, malfruadoj*, — argumentis Grinĉjo. — La tereno estas malglata en ĉi tiu ĉirkaŭaĵo, kaj troviĝas marĉoj kaj ĉiaj malfacilaĵoj sube en Mariŝo — mi konas la terenon ĉi-regione. Kaj se vi zorgas pri Nigraj Rajdantoj, mi ne konstatas, ke estas pli malbone renkonti ilin sur vojo ol en arbaro aŭ sur kampo.

— Malpli facile troveblas personoj en arbaro aŭ sur kampo, — respondis Frodo. — Kaj se oni supozas vin sur vojo, ekzistas ebleco, ke oni serĉos vin sur la vojo kaj ne aliloke.

— En ordo! — diris Grinĉjo. — Mi sekvos vin en ĉiun marĉon kaj fosejon. Sed estas malbonkore! Mi esperis preterpasi la *Oran Perkon* en Stoko antaŭ la sunsubiro. La plej bona biero en Orient-kvarono, aŭ iam estis; jam delonge mi ne gustumis ĝin.

— Tio decidas! — diris Frodo. — Eble pro rapidpadoj malfruadoj, sed pro trinkejoj pli longaj malfruoj. Ni devas ĉial teni vin for de la *Ora Perko*. Ni devas alveni Bokelboron antaŭ noktiĝo. Kion vi opinias, Sam?

— Mi iros laŭ vi, s-ro Frodo, — diris Sam malgraŭ privata antaŭtimo kaj profunda bedaŭro pri la plej bona biero en Orientkvarono.

— Do, se necesas trapeni marĉojn kaj dornojn, ni jam ekiru! — diris Grinĉjo.

Estis jam preskaŭ tiel varme, kiel en la antaŭa tago, sed nuboj komencis alproksimiĝi el la okcidento. Alveno de pluvo ŝajnis probabla. La hobitoj rampaĉis malsupren laŭ apika verda deklivo kaj plonĝis en la densan arbaron sube. Ilia direkto estis elektita por lasi Arbohalon maldekstre, kaj por transiri oblikve tra la arboj, kiuj grupiĝis laŭ la orienta flanko de la monteto, ĝis ili atingus la transan ebenaĵon. Tiam ili povus celi rekten al la Pramo sur tereno, kiu estis aperta krom pluraj drenfosaĵoj kaj latbariloj. Frodo kalkulis, ke laŭ rekta linio ili devis iri dek ok mejlojn.

Li baldaŭ trovis, ke la densejo estas pli kunpremita kaj pli interplektita ol ĝi ŝajnis. Mankis vojetoj tra la subpiedaĵo, kaj ili progresis ne tre rapide. Kiam ili baraktis ĝis la deklivosubo, ili trovis rojon, kiu subenfluis de la malantaŭaj montetoj en profunda ravino kun apikaj glitigaj flankoj superkreskitaj de rubusoj. Plej maloportune ĝi transiris la direkton, kiun ili elektis. Ili ne povis transsalti ĝin, nek entute transiri ĝin sen malsekiĝo, gratiĝo kaj koto. Ili haltis, pripensante, kion fari.

— L’ unua malhelpo! — diris Grinĉjo, ridetante malafable. Sam Vato retrorigardis. Tra apertejo de la arboj li ekvidis la supron de l’ verda deklivo, laŭ kiu ili ĵus malsupreniris.

— Vidu! — li diris, kroĉante brakon de Frodo. Ili ĉiuj rigardis, kaj sur la rando alte super ili, ili vidis kontraŭ la ĉielo starantan ĉevalon. Apud ĝi kliniĝis nigra figuro. Ili tuj rezignis pri la penso retroiri. Frodo iris la antaŭa, kaj plonĝis senprokraste en la densajn arbustojn apud la rivereto.

— Fu! — li diris al Grinĉjo. — Ni ambaŭ pravis! La rapidpado jam kurbiĝis; sed ni nur ĝustatempe trovis kaŝejon. Vi havas orelojn akrajn, Sam: ĉu vi aŭdas ion venanta? Ili staris senmovaj, apenaŭ spirante dum ili aŭskultis; sed ne aŭdeblis sono de persekuto.

— Mi ne supozas, ke li provos konduki la ĉevalon suben laŭ tiu deklivo, — diris Sam. — Sed konjekteble li scias, ke ni malsupreniris ĝin. Prefere ni pluiru.

Pluirado ne estis tute facila. Ili devis porti la tornistrojn, kaj la arbustoj kaj rubusoj ne volonte tralasis ilin. Ili estis ŝirmataj de la vento per la malantaŭa deklivo, kaj la aero estis senmova kaj sufoka. Kiam finfine ili traŝovis sin al pli aperta tereno, ili estis varmegaj, lacaj kaj tre gratitaj, kaj ili cetere ne plu certis pri la irata direkto. La bordoj de la rivereto malaltiĝis, kiam ĝi atingis la ebenaĵon kaj plilarĝiĝis kaj malprofundiĝis, kaj forvagis al Marišo kaj la Rivero.

— Ha, tio ĉi estas Stok-Rojo! — diris Grinĉjo. — Se ni intencas retrovi nian direkton, ni devas tuj transiri kaj ekiri dekstren.

Ili travadis la rivereton kaj rapidis tra larĝa apertejo aliflanke, junkokovrita kaj senarba. Poste ili renkontis denove zonon da arboj; altaj

kverkoj ĉefe, kun ie-tie ulmo aŭ frakseno. La tero estis pli-malpli ebena, kaj troviĝis malmulte da subkreskaĵo, sed la arboj tro proksimis unu alian por ke ili vidu fore antaŭen. La folioj bloviĝis supren pro subitaj ventospasmoj, kaj gutoj da pluvo ekfalis el la nubkovrita ĉielo. Poste la vento formortis kaj la pluvo falis inunde. Ili pluplandis kiel eble plej rapide tra herbobedoj, kaj tra densaj drivaĵoj de malnovaj folioj; kaj ĉie ĉirkaŭ ili la pluvo klakis kaj ruliĝis. Ili ne parolis, sed konstante rigardis malantaŭen kaj ambaŭflanken.

Post duonhoro Grinĉjo diris:

— Espereble ni ne turniĝis tro suden kaj ne marŝas laŭlonge de tiu ĉi arbaro! Ĝi estas zono ne tre larĝa — mi estus dirinta ne pli ol unu mejlon — kaj ni devis jam trapasi ĝin.

— Ne utilas, ke ni ekiru zigzage, — diris Frodo. — Tio neniel helpos. Ni daŭrigu laŭ nia nuna vojo! Mi ne certas, ke mi deziras atingi ankoraŭ la apertejon.

Ili pluiris eble pluan duon da mejloj. Tiam la suno denove ekbrilis inter la ĉifonecaj nuboj, kaj la pluvo malpliiĝis. Estis jam post la tagmezo, kaj ili sentis, ke aktualas tagmanĝi. Ili haltis sub ulmp: ties folioj, kvankam jam flaviĝantaj, tamen ankoraŭ densis, kaj la tero apud ĝia subo estis relative seka kaj ŝirmata. Kiam ili komencis pretigi la manĝon, ili trovis, ke la elfoj plenigis iliajn botelojn per klara trinkaĵo de pale ora koloro: ĝi odoris je mielo farita el multaj floroj kaj estis mirinde freŝiga. Tre baldaŭ ili ridadis kaj fajfis pri la pluvo kaj pri la Nigraj Rajdantoj. La finaj kelkaj mejloj, ili sentis, baldaŭ troviĝos malantaŭe.

Frodo apogis sian dorson al la arbotrunko kaj fermis siajn okulojn. Sam kaj Grinĉjo sidis proksime, kaj ili komencis zumkanti, kaj poste kanti mallaŭte:

> Ho! Ho! Ho! ek al botel’
> por korkurac’ kaj tristforpel’.
> Pluv’ eble falas, blovas vent’,
> kaj longas plu la trairend’,
> sed kuŝos mi sub arb’ en glor’,
> kaj lasos nubojn veli for.

“Ho! Ho! Ho!” — ili komencis pli laŭte. Subite ili eksilentis. Frodo salte stariĝis. Longedaŭra vekrio aŭdiĝis laŭ la vento, kiel krio de iu misintenca kaj soleca kreaĵo. Ĝi ondiĝis kaj finiĝis per alta trapika noto. Kiam ili sidis kaj staris, kvazaŭ subite glaciigite, ĝin respondis alia krio, malpli laŭta kaj pli fora, sed ne malpli sangofridiga. Poste sekvis silento, rompita nur per la sono de la vento inter la folioj.

— Kaj kio estis tio, laŭ via opinio? — Grinĉjo demandis finfine,

provante paroli senĝene, sed iom voĉtremante. — Se tio estis birdo, ĝi estis tia, kian mi neniam antaŭe aŭdis en la Provinco.

— Tio estis nek birdo, nek besto, — diris Frodo. — Tio estis alvoko, aŭ signalo — tiu krio enhavis vortojn, kvankam mi ne povis distingi ilin. Sed tian voĉon havas neniu hobito.

Ili diris nenion plu pri la afero. Ĉiuj pensis pri la Rajdantoj, sed neniu menciis ilin. Ili jam hezitis: ĉu resti ĉu pluiri; sed pli aŭ malpli baldaŭ ili devis transiri la apertejon ĝis la Pramo, kaj estis preferinde iri plej baldaŭ kaj en la taga lumo. Post kelkaj momentoj ili surŝultrigis siajn tornistrojn denove kaj ekiris.

Post nelonge la arbaro abrupte finiĝis. Larĝaj herbejoj etendiĝis antaŭ ili. Ili nun vidis, ke efektive ili turniĝis tro suden. Malproksime trans la ebenaĵo ili povis vidi la malaltan monteton de Bokelboro aliflanke de l' Rivero, sed ĝi nun troviĝis maldekstre de ili. Singarde ŝtelirante el la arbarorando, ili laŭeble rapide ekiris trans la apertan terenon.

Komence ili sentis timon for de l' arbara ŝirmo. En malproksimo post ili staris la altejo, kie ili matenmanĝis. Frodo duone atendis vidi la foran figureton de ĉevalrajdanto sur la firsto malhela kontraŭ la ĉielo; sed vidiĝis nenia signo pri tiu. La suno eskapanta el la disiĝantaj nuboj, dum ĝi subeniris al la montetoj, kiujn ili postlasis, denove helbrilis. Forlasis ilin la timo, kvankam ili ankoraŭ sentis maltrankvilon. Sed la tereno iĝis ĉiam pli malsovaĝa kaj bonordigita. Baldaŭ ili alvenis bone prizorgitajn kampojn kaj gresejojn, troviĝis heĝoj, dratbariloj kaj drenfosaĵoj. Ĉio ŝajnis trankvila kaj paca, tute kiel ordinara angulo de l' Provinco. Iliaj humoroj pliboniĝis ĉiupaŝe. La linio de l' Rivero pliproksimiĝis; kaj la Nigraj Rajdantoj ekŝajnis fantomoj de la arbaro jam longe postlasita.

Ili laŭiris la randon de granda napokampo, kaj alvenis fortikan latpordon, post kiu etendiĝis sulkoplena vojeto inter malaltaj prizorgitaj heĝoj al fora arbogrupo. Grinĉjo haltis.

— Mi konas ĉi tiujn kampojn kaj pordon! — li diris. — Ni estas sur la kampoj de maljuna terkulturisto Larvo. Nepre estas lia farmdomo tie inter la arboj.

— Ĝenoj unu post alia! — diris Frodo, aspektante preskaŭ tiel perturbita, kvazaŭ Grinĉjo ĵus deklarus, ke la vojeto estas fendo kondukanta al la loĝkaverno de drako. La aliaj rigardis lin surprizite.

— Kio ĝenas pri maljuna Larvo? — demandis Grinĉjo. — Li estas bona amiko de ĉiuj Brandobokoj. Kompreneble li terurigas entrudiĝantojn, kaj posedas sovaĝajn hundojn — sed finfine, personoj ĉi tie proksimas la landlimon kaj devas tiom pli gardi sin.

— Mi scias, — diris Frodo. — Tamen, — li aldonis kun hontema rido,

— mi timegas lin kaj liajn hundojn. Dum multaj jaroj mi evitis lian bienon. Li plurfoje trovis min entrudiĝanta por agarikoj, kiam mi estis junulo ĉe Brando-Halo. La lastan fojon li batis min, kaj poste vidigis min al siaj hundoj kaj diris: “Vidu, knaboj, kiam la venontan fojon tiu ĉi juna fripono ekpaŝos sur miajn kampojn, vi rajtos manĝi lin. Nun forpelu lin!” Ili persekutis min laŭ la tuta vojo ĝis la Pramo. Mi neniam forskuis la timegon — kvankam probable la bestoj konis sian aferon kaj ne estus efektive tuŝintaj min.

Grinĉjo ridis.

— Nu, jam estas tempo, ke vi amikiĝu. Precipe se vi intencas reveni por loĝadi en Boklando. Maljuna Larvo estas fakte bravulo, se vi ne tuŝas liajn agarikojn. Ni eniru la vojeton, kaj tiam ni ne estos entrudiĝantoj. Se ni renkontos lin, mi estu la parolanto. Li estas amiko de Gaja, kaj iam mi sufiĉe ofte akompanis lin ĉi tien.

Ili marŝis laŭ la vojeto, ĝis ili ekvidis la pajlotegmentojn de granda domo kaj farmokonstruaĵoj elstariĝantaj el la arboj antaŭe. La Larvoj, la Pudipiedoj en Stoko kaj la plimultaj loĝantoj en Mariŝo estis domloĝantoj; kaj lia farmdomo estis fortike konstruita el brikoj kaj havis altan muron ĉirkaŭe. Troviĝis larĝa ligna pordo, kiu malfermiĝis al la vojeto el la muro.

Subite, dum ili proksimiĝis, ekkomenciĝis terura ululado kaj bojado, kaj ili aŭdis laŭtan voĉon, kiu kriis:

— Ten! Dent! Lup! Antaŭen, knaboj!

Frodo kaj Sam tuj haltis, sed Grinĉjo plupromenis kelkajn paŝojn. La pordo malfermiĝis kaj tri hundegoj elkuris sur la vojeton, kaj alsturmis la vojaĝantojn, sovaĝe bojante. Ili tute malatentis Grinĉjon; sed Sam kaŭris kontraŭ la muro, dum du lupsimilaj hundoj snufis lin suspekteme, kaj subbojis se li moviĝis. La plej granda kaj feroca el la trio haltis antaŭ Frodo, hirta kaj graŭla.

Nun tra la pordo aperis larĝa fortika hobito kun ronda ruĝa vizaĝo.

— Halo’! Halo’! Kiu vi estas, kaj kion vi volas? — li demandis.

— Bonan posttagmezon, s-ro Larvo! — diris Grinĉjo. La terkulturisto rigardis lin proksime.

— Nu estas, ĉu ne, sinjoreto Grinĉjo — s-ro Peregrino Tjuko, mi devas diri! — li kriis, ŝanĝante brovumadon al rikaneto. — Jam delonge mi ne vidis vin en tiu ĉi loko. Feliĉe por vi, ke mi konas vin. Mi ĝuste intencis inciti miajn hundojn kontraŭ fremduloj. Okazas hodiaŭ kelkaj kuriozaĵoj. Kompreneble, ja okazas de tempo al tempo, ke fremduloj vagas en ĉi regiono. Tro proksime al la Rivero, — li diris, skuante la kapon. — Sed tiu ulo estis la plej strangaspekta, kiun miaj okuloj iam ajn trafis. Li ne transiros senpermese mian kamparon la duan fojon, se mi kapablos tion malhelpi.

— Kian ulon vi aludas? — demandis Grinĉjo.

— Do lin vi ne vidis? — diris la terkulturisto. — Li laŭiris la vojeton al la ŝoseo antaŭ ne tre longe. Li estis strangulo kaj starigis strangajn demandojn. Sed vi eble eniru la domon, kaj ni interŝanĝos pli komforte la novaĵojn. Mi havas iom da bona elo kranebla, se vi kaj viaj amikoj emas, s-ro Tjuko.

Ŝajnis klare, ke la terkulturisto rakontos pli, se al li estus permesate tion fari propratempe kaj propramaniere, do ĉiuj akceptis la inviton.

— Kio pri la hundoj? — demandis Frodo maltrankvile. La terkulturisto ridis.

— Ili ne ĝenos vin, krom se mi tion ordonos. Jen, Ten! Dent! Alkalkanen! — li kriis. — Alkalkanen, Lup!

Malŝarĝante la mensojn de Frodo kaj Sam, la hundoj formarŝis kaj lasis ilin liberaj. Grinĉjo prezentis la du aliajn al la terkulturisto.

— S-ro Frodo Baginzo, — li diris. — Vi eble ne memoras lin, sed iam li loĝis ĉe Brando-Halo.

Pro la nomo Baginzo la terkulturisto eksurpriziĝis, kaj akre alrigardis Frodon. Momente Frodo ekpensis, ke memoro pri la ŝtelitaj agarikoj estas vekita, kaj ke al la hundoj estos ordonite lin forpeli. Sed Terkulturisto Larvo prenis lian brakon.

— Nu, ĉu tio ne estas eĉ pli stranga? — li ekkriis. — S-ro Baginzo, ĉu? Envenu! Necesas interparoli.

Ili eniris la kuirejon de la terkulturisto kaj eksidis antaŭ la larĝa kameno. S-ino Larvo alportis bieron en granda ujo kaj plenigis kvar grandajn kruĉojn. Ĝi estis bona, kaj Grinĉjo trovis sin pli ol kompensita rilate maltrafon de la *Ora Perko*. Sam glutetis sian bieron suspekteme. Li nature malfidis loĝantojn en aliaj partoj de la Provinco; kaj cetere li ne emis amikiĝi rapide kun iu, kiu batis lian mastron, negrave antaŭ iom longe.

Post kelkaj komentoj pri la vetero kaj la agrikulturaj probablecoj (kiuj ne pli misaŭguris ol kutime), terkulturisto Larvo demetis sian tasegon kaj rigardis ilin laŭvice.

— Nu, s-ro Peregrino, — li diris, — de kie vi venis, kaj kien vi intencas iri? Ĉu vi venis viziti min? Ĉar, se tiel, vi preterpasis mian pordon sen ke mi rimarkis vin.

— Nu, ne, — respondis Grinĉjo. — Se paroli vere, ĉar tion vi jam divenis, ni suriris la vojeton ĉe la alia finaĵo; ni trapasis viajn kampojn. Sed tio okazis pro hazardo. Ni perdis la vojon en la arbaro, malantaŭe apud Arbohalo, provante trovi rapidpadon ĝis la Pramo.

— Se mankis tempo, la vojo vin servus pli bone, — diris la terkulturisto. — Sed ne tio min koncernis. Vi havas permeson trapasi mian kamparon, se

tion vi emas, s-ro Peregrino. Ankaŭ vi, s-ro Baginzo, kvankam probable ankoraŭ plaĉas al vi agarikoj, — li ridis. — Ha jes, la nomon mi rekonis. Mi memoras tempon, kiam la juna Frodo Baginzo estis unu el la plej friponaj junuloj en Boklando. Sed ne pri agarikoj mi pensis. Mi aŭdis la nomon Baginzo ĝuste antaŭ ol vi aperis. Kion, laŭ via supozo, demandis al mi tiu stranga ulo?

Ili atendis maltrankvile ĝis li priparolis.

— Nu, — la terkulturisto daŭrigis, proksimiĝante al sia celo kun lanta antaŭplezuro. — Li venis rajdante grandan nigran ĉevalon tra la pordo, kiu hazarde estis malfermita, kaj antaŭen ĝis mia dompordo.

Tute nigra estis ankaŭ li mem, kaj mantelita kaj kapuĉita, kvazaŭ li ne volus esti rekonata. “Ja kion en la Provinco li povas deziri?” mi pensis private. Ne multajn el la granduloj ni vidas cis la landlimo; kaj ĉiuokaze mi neniam aŭdis pri tia, kia ĉi nigrulo. “Bonan tagon al vi! — mi diras, elirante al M. — Ĉi tiu vojeto kondukas nenien, kaj kien ajn vi intencas iri, plej rapide estos reen al la vojo”. Ne plaĉis al mi lia aspekto; kaj kiam Ten elvenis, ĝi snufis unufoje kaj elpuŝis jelpon, kvazaŭ ĝi estus pikita: ĝi mallevis la voston kaj forkuregis kriĉante. La nigrulo sidis tute senmove.

» “Mi venis de tie, — li diris, malrapide kaj retenite, indikante al la okcidento, trans *miaj* kampoj, ĉu vi kredas. — Ĉu vi vidis *Baginzon*?” — li demandis strangavoĉe, kaj kliniĝis al mi. Nenian vizaĝon mi povis vidi, ĉar lia kapuĉo pendis malalten; kaj mi sentis tremeton je mia dorso. Sed mi ne konsentis, ke li trarajdu tiel arogante mian kamparon.

» “Foriru! — mi diris. — Troviĝas ĉi tie neniuj Baginzoj. Vi estas en malĝusta regiono de la Provinco. Prefere reiru okcidenten al Hobiturbo — sed ĉi-foje vi iru laŭ la vojo”.

» “Baginzo foriris, — li respondis flustre. — Li alvenas. Li ne tre malproksimas. Mi volas trovi lin. Se li preterpasos, ĉu vi sciigos min? Mi revenos kun oro”.

» “Tion vi ne faros, — mi diris. — Vi reiros tien, de kie vi venis, rapidege. Mi lasas por vi unu minuton antaŭ ol mi vokos ĉiujn miajn hundojn”.

» Li eligis specon de siblo. Tio eble estis ridado, eble ne. Poste li spronis sian ĉevalon rekte al mi, kaj mi forsaltis lastmomente. Mi vokis la hundojn, sed li forsvingiĝis kaj trarajdis la pordon kaj laŭ la vojeto al la ŝoseo kiel tondroklako. Kion vi opinias pri tio?

Frodo sidis momente, rigardante la fajron, sed li pensis nur kiel diable ili atingu la Pramon.

— Mi ne scias, kion pensi, — li diris fine.

— Do mi sciigos al vi, kion pensi, — diris Larvo. — Vi ne devis

intermiksiĝi kun hobiturbanoj, s-ro Frodo. Personoj tie estas strangaj. — Sam ekmoviĝis sur sia seĝo, kaj rigardis la terkulturiston neamike. — Sed vi ĉiam estis knabo senpripensa. Kiam mi aŭdis, ke vi lasis Brandobokojn kaj foriris al tiu maljuna s-ro Bilbo, mi aŭguris, ke vi trafos en malfacilaĵojn. Atentu miajn vortojn, ĉio ĉi devenas de tiuj strangaj faroj de s-ro Bilbo. Sian monon li akiris iel strange en fremdaj lokoj, oni diras. Eble iuj emas eltrovi, kio okazis pri la oro kaj juveloj, kiujn li subterigis sur la monteto en Hobiturbo, kiel mi aŭdis?

Frodo diris nenion: la sagacaj supozoj de la terkulturisto estis iom maltrankviligaj.

— Nu, s-ro Frodo, — Larvo daŭrigis, — mi ĝojas, ke vi tiel saĝe revenis al Boklando. Jen mia konsilo: restu tie! Kaj ne intermiksiĝu kun tiuj strangaj eksteruloj. Ĉi tie vi havos amikojn. Se persekutos vin denove iuj nigruloj, mi pritraktos ilin. Mi diros, ke vi mortis, aŭ forlasis la Provincon, aŭ kion ajn vi volas. Kaj eble tio sufiĉe veros, ĉar tre probable estas maljuna s-ro Bilbo, pri kiu ili serĉas sciigojn.

— Vi eble pravas, — diris Frodo, evitante la okulojn de l' terkulturisto kaj fikse rigardante la fajron.

Larvo rigardis lin penseme.

— Nu, evidente vi havas proprajn ideojn, — li diris. — Estas tiel evidenta, kiel mia nazo, ke ne hazardo venigis ĉi tien vin kaj tiun rajdanton samtage; kaj eble mia novaĵo finfine ne estis por vi multe nova. Mi ne postulas, ke vi diru al mi ion ajn, pri kio vi preferas silenti; sed mi konstatas, ke vi estas perturbita de io. Eble vi pensas, ke ne estos tro facile atingi la Pramon nekaptite?

— Tion mi ja pensis, — diris Frodo. — Sed ni devas provi tien veni; kaj tion ni ne plenumos sidante kaj pensante. Do bedaŭrinde ni devas foriri. Tre koran dankon pro via bonkoreco! Mi timis vin kaj viajn hundojn jam de pli ol tridek jaroj, terkulturisto Larvo, kvankam aŭdinte tion vi eble emos ridi. Estis domaĝe: ĉar mi maltrafis bonan amikon. Kaj nun mi bedaŭras forlasi vin tiel baldaŭ. Sed mi revenos, eble, iun tagon — se tion la sorto permesos.

— Vi estos bonvena, kiam vi venos, — diris Larvo. — Sed nun mi havas ideon. Estas jam preskaŭ la sunsubiro, kaj ni intencas vespermanĝi; ĉar plejofte ni enlitiĝas baldaŭ post la suno. Se vi kaj s-ro Peregrino kaj ĉiuj povus resti kaj manĝi kun ni, ni estus vere kontentaj!

— Kaj ankaŭ ni! — diris Frodo. — Sed ni devas tuj ekiri, mi timas. Eĉ nun estos mallume antaŭ ol ni alvenos la Pramon.

— Ha! sed atendu momenton! Mi intencis diri, ke post iom da manĝo mi eligos malgrandan furgonon, kaj mi veturigos vin ĉiujn ĝis la Pramo. Tio ŝparos al vi iom da marŝado kaj eble ŝparos al vi ankaŭ alispecajn ĝenojn.

Frodo nun akceptis dankeme la inviton, kio malŝarĝis Grinĉjon kaj Samon. La suno jam estis malantaŭ la okcidentaj montetoj, kaj la lumo ekmalheliĝis. Envenis du filoj de Larvo kaj liaj tri filinoj, kaj malavara vespermanĝo estis surtabligita. La kuirejon lumigis kandeloj kaj la fajro estis hejtita. S-ino Larvo vigle eniris-eliris. Unu-du aliaj hobitoj, kiuj estis bienlaboristoj, envenis. Baldaŭ dekkvaropo sidiĝis por manĝi. Biero abundis, kaj giganta plado de agarikoj kaj ŝinko, krom multaj aliaj solidaj farmbienaj manĝaĵoj. La hundoj kuŝis apudfajre kaj mordis lardhaŭton kaj krakigis ostojn.

Finmanĝinte, la terkulturisto kaj ties filoj eliris kun lanterno kaj pretigis furgonon. Estis mallume en la korto, kiam la gastoj eliris. Ili surĵetis la tornistrojn kaj engrimpis. La terkulturisto sidiĝis sur la gvidbenkon, kaj vipklake irigis siajn du fortajn ponecojn. Lia edzino staris en la lumo de la malfermita dompordo.

— Gardu vin bone, Larvo! — ŝi vokis. — Ne disputu kun fremduloj kaj revenu senprokraste!

— Tion mi faros! — li diris kaj forruliĝis tra la pordo. Nun bloviĝis eĉ ne spiro de vento; la nokto daŭris trankvila kaj kvieta, kaj la aero estis frosteta. Ili antaŭeniris senlanterne kaj malrapide. Post unu-du mejloj finiĝis la vojeto, transiranta profundan drenfosaĵon kaj supreniranta laŭ mallonga deklivo ĝis altkonstruita ŝoseo.

Larvo descendis kaj atente observis ambaŭdirekten, norden kaj suden, sed nenio videblis en la mallumo, kaj sur la senmova aero aŭdiĝis neniu sono. Maldensaj strioj da rivernebuleto pendis super la fosaĵoj, kaj rampis tra la kampoj.

— Iĝos dense, — diris Larvo, — sed la lanternojn mi ne lumigos ĝis mi retroiros. Ion sur la vojo ni aŭdos longe antaŭ ol renkonti ĝin hodiaŭ vespere.

Estis kvin mejloj aŭ pli de l’ vojeto de Larvo ĝis la Pramo. La hobitoj ĉirkaŭvolvis sin, sed iliaj oreloj estis streĉitaj por aŭdi iun ajn sonon krom la grinco de l’ radoj kaj la malrapida klako de l’ poneaj hufoj. La furgono ŝajnis al Frodo pli malrapida ol heliko. Apude Grinĉjo kapokline proksimiĝis al dormo, sed Sam fikse rigardis antaŭen en la densiĝantan nebulon.

Finfine ili alvenis la komenciĝon de la prama vojeto. Ĝin signis du altaj blankaj stangoj, kiuj subite ekaperis dekstre. Terkulturisto Larvo haltigis la poneojn kaj la furgono grince senmoviĝis. Ili ĝuste komencis elfurgoniĝi, kiam subite ili aŭdis tion, kion ili la tutan tempon timis: hufojn sur la vojo antaŭe. La sono proksimiĝis al ili.

Larvo desaltis kaj staris tenante la kapojn de la poneoj, kaj fiksrigardis

antaŭen en la malhelon. “Klak-klak, klak-klak”, aŭdiĝis la proksimiĝanta rajdanto. La hufoklakoj sonis laŭte en la senmova nebula aero.

— Prefere kaŝu vin, s-ro Frodo, — diris Sam malserene. — Kuŝiĝu en la furgono kaj kovru vin per lankovriloj, kaj ni devigos tiun rajdanton forturniĝi! — Li elgrimpis kaj iris stari apud la terkulturisto. Nigraj Rajdantoj devus transrajdi lin por aliri la furgonon.

“Klak-klak, klak-klak”. La rajdanto preskaŭ atingis ilin.

— Saluton al vi! — vokis terkulturisto Larvo. La proksimiĝantaj hufoj abrupte haltis. Ili supozis vidi malhelan mantelitan formon en la nebulo, dutri paŝojn antaŭe.

— Atentu! — diris la terkulturisto, ĵetante la gvidrimenojn al Sam kaj paŝante antaŭen. — Ne proksimiĝu eĉ unu paŝon! Kion vi celas, kaj kien vi iras?

— Mi celas s-ron Baginzo. Ĉu vi vidis lin? — diris sordinita voĉo — sed ĝi estis la voĉo de Gaja Brandoboko. Kaŝlanterno estis malkovrita, kaj ties lumo trafis la mirigitan vizaĝon de la terkulturisto.

— S-ro Gaja! — li kriis.

— Jes, kompreneble! Kion vi supozis? — diris Gaja, paŝante antaŭen. Kiam li elnebuliĝis kaj iliaj timoj malkreskis, li ŝajnis subite malgrandiĝi al staturo normale hobita. Li rajdis poneon, kaj skarpo estis volvita ĉirkaŭ la kolo kaj trans la mentono por forteni la nebulon.

Frodo saltis el la furgono por saluti lin.

— Do jen vi finfine! — diris Gaja. — Mi komencis dubi, ĉu vi entute aperos hodiaŭ, kaj mi estis ĝuste reironta por vespermanĝi. Kiam nebuliĝis mi transvenis kaj rajdis direkte al Stoko por vidi, ĉu vi falis en iun drenfosaĵon. Sed mi tute ne scias, laŭ kiu vojo vi alvenis. Kie vi trovis ilin, s-ro Larvo? En via anaslageto?

— Ne, mi kaptis ilin, kiam ili entrudiĝis, — diris la terkulturisto, — kaj preskaŭ igis miajn hundojn ataki ilin; sed ili rakontos mem la tutan historion, sendube. Nun, se vi forpermesos min, s-ro Gaja kaj s-ro Frodo kaj ĉiuj, prefere mi ekiru hejmen. S-ino Larvo certe malsereniĝos, ĉar la nokto dense nebuliĝis.

Li retroirigis la furgonon en la vojeton kaj turnis ĝin.

— Nu, bonan nokton al ĉiuj, — li diris. — Tio estis stranga tago, sen ia dubo. Sed fino bona, ĉio bona; kvankam eble ni prefere ne diru tion ĝis ni atingos proprajn hejmojn. Estas ja vere, ke ankaŭ mi ĝojos tion fari.

Li lumigis siajn lanternojn, kaj surfurgoniĝis. Subite li eltiris korbegon el sub la benko.

— Mi preskaŭ forgesis, — li diris. — S-ino Larvo pakis tion ĉi por s-ro Baginzo, kun siaj bondeziroj. — Li transdonis ĝin kaj formoviĝis, sekvate

de abundaj dankesprimoj kaj deziroj pri bona nokto.

Ili rigardis la palajn ringojn de lumo ĉirkaŭ liaj lanternoj dum ili malaperis en la nebulan nokton. Subite Frodo ridis: el la kovrita korbego, kiun li tenis, leviĝis odoro de agarikoj.

5

Konspiro senmaskigita

Nun ni mem prefere hejmeniĝu, — diris Gaja. — En ĉio ĉi estas io nenormala, mi konstatas; sed tio atendu ĝis ni endomos.

Ili turniĝis sur la Pram-vojeton, kiu estis rekta kaj bone prizorgita kaj randita per blankfarbitaj ŝtonegoj. Post proksimume cent jardoj ĝi kondukis ilin ĝis la riverbordo, kie staris larĝa ligna ĝetkajo. Granda plata pramboato estis alterigita apude. La blankaj bolardoj proksimaj al la akvorando ekbrilis pro lumo de du lanternoj sur altaj fostoj. Malantaŭ tiuj la nebuleto sur la ebenaj kampoj jam supris la heĝojn; sed la akvo antaŭ ili estis malhela, kun nur kelkaj kirliĝantaj strioj kvazaŭ vaporo inter la kanoj apudbordaj. Ŝajnis troviĝi malpli da nebulo kontraŭflanke.

Gaja kondukis la poneon per paŝponto sur la pramboaton, kaj la aliaj sekvis. Gaja poste forpuŝis malrapide per longa stango. Fluis lante kaj larĝe antaŭ ili Brandovino. Ĉe l' alia bordo la deklivo estis apika, kaj laŭ ĝi supreniris serpentuma vojeto ekde la tiuflanka ĝeto. Tie ekbrilis lanternoj. Malantaŭen baŭmis Bokmonteto; kaj el ĝi, tra maldensaj kovraĵoj da nebuleto, brilis multaj rondaj fenestroj, flavaj kaj ruĝaj. Tiuj estis la fenestroj de Brando-Halo, la antikva hejmo de la Brandobokoj.

Antaŭ longe Gorhendado Oldboko, ĉefo de la familio Oldboko, unu el la plej malnovaj familioj en Mariŝo aŭ efektive en la Provinco, transiris la riveron, kiu estis la origina limo de la lando en la oriento. Li konstruis (kaj elfosis) Brando-Halon, ŝanĝis sian nomon al Brandoboko, kaj tie loĝadis, iĝante mastro de io, kio estis praktike landeto sendependa. Lia familio kreskis-kreskadis, kaj post lia epoko daŭre kreskadis, ĝis Brando-Halo okupis la tutan malalton de la monteto kaj havis tri grandajn dompordojn, multajn flankpordojn kaj ĉirkaŭ cent fenestrojn. La Brandobokoj kaj ties multnombraj dependantoj poste komencis enfosi kaj poste konstrui en la tuta ĉirkaŭaĵo. Tiel originis Boklando, dense loĝata terstrio inter la rivero kaj la Malnova Arbaro, speco de provinca kolonio. Ties ĉefa vilaĝo estis Bokelboro, kiu grupiĝis en la deklivoj malantaŭ Brando-Halo.

La loĝantoj en Mariŝo rilatis amike al la boklandanoj, kaj la obeoteco de la mastro de l' Halo (kiel oni nomis la ĉefon de la familio Brandoboko) estis daŭre rekonata de la terkulturistoj inter Stoko kaj Raŝeo. Sed la plimultaj personoj en la malnova Provinco taksis la boklandanojn kiel strangulojn,

duone fremdajn por tiel diri. Malgraŭ tio, ke ili tamen ne tre malsimilis la ceterajn hobitojn de la Kvar Kvaronoj, krom tio, ke ili ŝatis boatojn, kaj iuj el ili sciis naĝi.

Ilia tereno estis komence nedefendata oriente; sed tiuflanke ili konstruis heĝon: la Alta Fojno. Ĝi estis plantita antaŭ multaj generacioj, kaj nun estis densa kaj alta, ĉar oni konstante prizorgis ĝin. Ĝi etendiĝis la tutan distancon ekde la Brandovina Ponto, laŭ longa kurbiĝo for de la rivero, ĝis Hejsendo (kie Videvindlo fluis el la Arbaro en Brandovinon): multe pli ol dudek mejlojn de unu fino ĝis la alia. Sed kompreneble, tio ne estis kompleta protektaĵo. La Arbaro proksimiĝis al la heĝo multloke. La boklandanoj ŝlosis siajn pordojn post la noktiĝo, kaj tio ne estis kutimo en la Provinco.

La pramboato malrapide transiris la akvon. Proksimiĝis la boklanda bordo. Sam estis la sola grupano, kiu ne transiris pli frue la riveron. Li sentiĝis strange dum la lanta gargara rivereto preterfluis: lia antaŭa vivo kuŝis malantaŭe en la nebulo, antaŭe kuŝis malhelaj aventuroj. Li gratis sian kapon, kaj momente spertis paseman deziron, ke s-ro Frodo daŭre vivu kviete en Bag-Endo.

La kvar hobitoj paŝis elboate. Gaja estis liganta ĝin, kaj Grinĉjo jam kondukis la poneon laŭ la vojeto, kiam Sam (kiu retrorigardis, kvazaŭ por adiaŭi la Provincon) diris per raŭka flustro:

— Rerigardu, s-ro Frodo! Ĉu vi ion vidas?

Sur la aliflanka ĝeto, sub la malproksimaj lanternoj, ili povis ĝuste ekvidi figuron: ĝi aspektis kiel malhela nigra pakaĵo postlasita. Sed dum ili rigardis, ĝi ŝajnis moviĝi kaj balanciĝi tien-reen, kvazaŭ serĉante sur la grundo. Poste ĝi rampis, aŭ iris kaŭre, reen en la malhelon preter la lanternoj.

— Kio en la Provinco estas tio? — ekkriis Gaja.

— Io, kio nin persekutas, — diris Frodo. — Sed ne demandu plu nuntempe! Ni senprokraste foriru! — Ili rapidis supren laŭ la vojeto ĝis la deklivoverto, sed kiam ili rerigardis la alia bordo estis nebulkovrita, kaj nenio estis videbla.

— Vi feliĉe ne lasas boatojn ĉe la okcidenta bordo! — diris Frodo.

— Ĉu ĉevaloj kapablas transiri la riveron?

— Ili povas iri dudek mejlojn norden — aŭ ili eble naĝus, — respondis Gaja. — Kvankam mi neniam aŭdis, ke ĉevalo transnaĝis Brandovinon. Sed kiel ĉevaloj tuŝas la aferon?

— Mi rakontos al vi poste. Prefere ni endomiĝu, kaj tiam ni povos paroli.

— En ordo! Vi kaj Grinĉjo konas la vojon; do mi simple antaŭenrajdos

kaj sciigos al Dikulo Bolĝero, ke vi alvenas. Ni prizorgos vespermanĝon kaj tiel plu.

— Ni vespermanĝis frue kun terkulturisto Larvo, — diris Frodo; — sed plia manĝo bonvenus.

— Vi ricevos! Donu al mi tiun korbon! — diris Gaja, kaj rajdis antaŭen en la mallumon.

De Brandovino ĝis la nova domo de Frodo en Stretkavo estis kelka distanco. Ili preterpasis Bokmonteton kaj Brando-Halon je la maldekstro, kaj ĉe la limo de Bokelboro trafis la ĉefstraton de Boklando, kiu iris suden de la ponto. Duonmejlon norde laŭ ĝi ili alvenis komenciĝon de vojeto dekstre. Tiun ili sekvis tra duo da mejloj dum ĝi supren-subeniris en la kamparon. Finfine ili alvenis mallarĝan pordon en densa heĝo. Neniom vidiĝis la domo en la mallumo: ĝi staris for de la vojeto meze de larĝa cirklo da razeno ĉirkaŭita de linio da malaltaj arboj interne de la limheĝo. Frodo estis elektinta ĝin pro tio, ke ĝi staris en nefrekventita angulo de la regiono, kaj neniuj aliaj loĝejoj estis en la proksimo. Oni povis eniri kaj eliri nerimarkite. Ĝi estis konstruita antaŭ longe de la Brandobokoj por uzo de gastoj, aŭ familianoj, kiuj volis eskapi el la multpersona vivo de Brando-Halo dum kelka tempo. Ĝi estis malnovmoda kampareca domo, laŭeble simila al hobit-truo, longa kaj malalta, sen supra etaĝo; kaj ĝi havis tegmenton el torfo, rondajn fenestrojn kaj grandan rondan pordon.

Kiam ili marŝis laŭ la pado, neniu lumo videblis; la fenestroj estis mallumaj kaj ŝutrokovritaj. Frodo frapis la pordon, kaj Dikulo Bolĝero ĝin malfermis. Amikeca lumo trabrilis. Ili enrapidis kaj enfermis sin kaj la lumon. Ili troviĝis en larĝa vestiblo kun pordoj ambaŭflanke; antaŭ ili etendiĝis koridoro tra la mezo de la domo.

— Nu, kion vi opinias pri ĝi? — demandis Gaja, venante laŭ la koridoro. — Ni faris nian plejeblon dum mallonga tempo aspektigi ĝin kiel hejmon. Finfine, Dikulo kaj mi nur hieraŭ alvenis kun la lasta furgono.

Frodo ĉirkaŭrigardis. Ĝi ja aspektis hejmece. Multaj el liaj plej ŝatataj posedaĵoj — aŭ posedaĵoj de Bilbo (ili memorigis akre pri li en sia nova medio) — estis aranĝitaj laŭeble simile, kiel en Bag-Endo. Ĝi estis loko agrabla, komforta, bonveniga; kaj li trovis, ke li deziras efektive veni por enloĝiĝi al kvieta emeriteco. Ŝajnis maljuste, ke li tiom laborigis siajn amikojn; kaj li pripensis denove, kiel li anoncos al ili, ke li devos tre baldaŭ foriri, preskaŭ tuj efektive.

— Ĝi estas admirinda! — li diris, iom pene. — Mi apenaŭ sentas, ke mi entute translokiĝis.

La vojaĝantoj pendigis siajn mantelojn, kaj amasigis sur la planko siajn tornistrojn. Gaja kondukis ilin tra la koridoro kaj ĵetmalfermis pordon ĉe la

fino. Elvenis fajrolumo, kaj blovaĵo da vaporo.

— Bankuvo! — kriis Grinĉjo. — Ho benita Gajadoko!

— Laŭ kiu ordo ni eniru? — diris Frodo. — Ĉu unue la plej maljuna, aŭ unue la plej rapida? Ambaŭokaze vi eniros lasta, sinjoreto Peregrino.

— Fidu al mi pli bone aranĝi ol tiel! — diris Gaja. — Ne eblas komenci vivadon en Stretkavo per kverelo pri sinbanoj. En ĉi tiu ĉambro troviĝas *tri* bankuvoj, kaj kaldrono plena de bolanta akvo. Troviĝas ankaŭ viŝtukoj, matoj kaj sapo. Eniru kaj rapidu!

Gaja kaj Dikulo eniris la kuirejon aliflanke de la koridoro kaj okupiĝis pri finpreparoj por malfrua vespermanĝo. Eroj de konkurantaj kantoj aŭdiĝis el la banĉambro, miksitaj kun sonoj de plaŭdado kaj plonĝado. La voĉo de Grinĉjo subite leviĝis super la ceterajn per unu el la ŝatataj bankantoj de Bilbo.

Ha! Bani sin ĉe l’ tagofino,
forlavi koton de l’ lac-obstino!
Kiu ne kantas, stulte sobras:
ho, Akvo Varma vere noblas!

Ho, pluvosono dolĉ-ekstazas,
kaj rojo, kiu suben saltas; —
ol pluv’ kaj rojo pli valoras
la Akvo Varma, kiu vaporas.

Ha! Fridan akvon ni verŝu foje
al gorĝ’ soifa kaj trinku ĝoje;
prefere Bier’ soifon puŝu,
per Akvo Varma la dorson duŝu.

Ha! Akvo saltanta estas bela
en blanka fontano subĉiela;
sed fontan’ ne dolĉas pli al aŭdo
ol Akvo Varma en vigla plaŭdo!

Aŭdiĝis granda plaŭdego, kaj krio “Halt!” de Frodo. Evidentiĝis, ke granda parto de la banakvo de Grinĉjo imitis fontanon kaj saltiĝis alten.

Gaja aliris la pordon:

— Kio pri vespermanĝo kaj biero en la gorĝo? — li vokis. Frodo elvenis sekigante siajn harojn.

— En la aero estas tiom da akvo, ke mi alvenas la kuirejon por fini, — li diris.

— Ho ve! — diris Gaja, enrigardante. La ŝtona planko estis akvokovrita. — Vi devos forŝvabri tion antaŭ ol ricevi manĝaĵon, Peregrino. Rapide, aŭ

ni ne atendos vin.

Ili vespermanĝis en la kuirejo, ĉe tablo proksime al la fajro.

— Supozeble vi tri ne deziros denove agarikojn? — diris Fredegaro sen multe da espero.

— Ni deziros! — kriis Grinĉjo.

— Ili estas miaj! — diris Frodo. — Donitaj al *mi* de s-ino Larvo, reĝino inter terkulturistedzinoj. Forigu la avidajn manojn, kaj mi disdonos ilin.

Hobitoj pasie frandas agarikojn, eĉ pli ol la granduloj. Tiu fakto parte klarigas la longajn ekspediciojn de juna Frodo ĝis la famaj kampoj de Marišo kaj la koleron de la ofendita Larvo. Ĉi-okaze troviĝis sufiĉe por ĉiuj, eĉ laŭ la hobitaj kriterioj. Sekvis ankaŭ multaj aliaj manĝindaĵoj, kaj, kiam ili finmanĝis, eĉ Dikulo Bolĝero suspiris kontente. Ili forpuŝis la tablon kaj aranĝis seĝojn ĉirkaŭ la fajro.

— Ni formetos la manĝilojn poste, — diris Gaja. — Nun rakontu la tuton! Mi konjektas, ke vi spertis aventurojn, kio sen mi ne estis tre justa. Mi postulas plenan rakonton; kaj antaŭ ĉio mi deziras scii, kio ĉagrenis maljunan Larvon, kaj kial li alparolis min tiel. Lia voĉo sonis kvazaŭ *timigita*, se tio estas ebla.

— Ni ĉiuj estas timigitaj, — diris Grinĉjo post paŭzo, dum kiu Frodo fiksrigardis la fajron kaj ne parolis. — Ankaŭ vi estus, se vin persekutus dum du tagoj Nigraj Rajdantoj.

— Kaj kio estas ili?

— Nigraj figuroj rajdantaj nigrajn ĉevalojn, — respondis Grinĉjo. — Se Frodo ne volas paroli, mi rakontos la tuton ekde la komenco.

Li rakontis la tutan historion pri la vojaĝo, ekde kiam ili forlasis Hobiturbon. Sam de tempo al tempo kapjesis kaj konfirmis. Frodo restis silenta.

— Mi supozus, ke vi inventis ĉion, — diris Gaja, — se mi ne vidus tiun nigran formon sur la ĝetkajo — kaj aŭdus la strangan tonon de la voĉo de Larvo. Kion vi pensas pri ĉio ĉi, Frodo?

— Nia Frodo estis tre enfermita, — diris Grinĉjo. — Sed jam venis tempo, ke li apertiĝu. Ĝis nun ni ricevis neniun indikon pli, ol la diveno de terkulturisto Larvo, ke ĝi iel tuŝas la trezoron de maljuna Bilbo.

— Tio estis nur konjekto, — diris Frodo haste, — Larvo nenion *scias*.

— Maljuna Larvo estas sagaculo, — diris Gaja. — Multo okazas malantaŭ lia ronda vizaĝo, kio ne eliras per liaj paroloj. Mi aŭdis, ke li iam kutimis eniri la Malnovan Arbaron, kaj laŭreputacie li konas sufiĉe multajn strangaĵojn. Sed vi povas almenaŭ sciigi al ni, Frodo, ĉu vi taksas lian konjekton trafa aŭ maltrafa.

— Mi *opinias*, — respondis Frodo malrapide, — ke tio estis trafa

konjekto, ĝis certa grado. Vere *estas* ligo kun la praaventuroj de Bilbo, kaj la Rajdantoj esploras, aŭ pli trafe diri *serĉas*, lin aŭ min. Mi timas ankaŭ, se vi volas scii, ke tio ŝajnas al mi neniel bagatelo; kaj ke mi ne estas sekura ĉi tie aŭ aliloke. — Li ĉirkaŭrigardis al la fenestroj kaj muroj, kvazaŭ timante, ke ili subite cedus. La aliaj rigardis lin silente, kaj interŝanĝis inter si signifoplenajn okulsignojn.

— Ĝi baldaŭ elvenos, — flustris Grinĉjo al Gaja. Gaja kapjesis.

— Nu! ~ diris Frodo finfine, rektigante la dorson, kvazaŭ li ion decidus. — Mi ne plu povas kaŝi tion. Mi havas ion por sciigi al vi. Sed mi entute ne scias, kiel komenci.

— Mi opinias, ke mi povus helpi vin, — diris Gaja kviete, — parton el ĝi rakontante mem.

— Kion vi celas? — diris Frodo, lin rigardante antaŭtime.

— Nur jenon, mia kara olda Frodo: vi estas malĝoja, ĉar vi ne scias, kiel adiaŭi. Vi intencas forlasi la Provincon, kompreneble. Sed danĝero alvenis pli frue, ol vi anticipis, kaj nun vi decidiĝas foriri tuj. Kaj tion vi ne deziras. Ni tre kompatas vin.

Frodo malfermis sian buŝon kaj refermis ĝin. Lia surprizita aspekto estis tiel komika, ke ili ekridis.

— Kara olda Frodo! — diris Grinĉjo. — Ĉu vi vere kredis, ke vi ĵetis al ni polvon en la okulojn? Vi estis nek sufiĉe singarda, nek sufiĉe lerta por tio! Vi evidente planadis kaj adiaŭis al ĉiuj viaj frekventejoj dum la tuta jaro ekde aprilo. Ni konstante aŭdis vian murmuradon: "Ĉu mi iam denove enrigardos tiun valon, mi scivolas", kaj similajn aferojn. Kaj ŝajnigado, ke vi atingis finon de via mono, kaj eĉ vendado de via amata Bag-Endo al tiuj Retikul-Baginzoj! Kaj ĉiuj tiuj konversacioj kun Gandalfo.

— Bona ĉielo! — diris Frodo. — Mi pensis, ke mi estis samtempe singarda kaj lerta. Mi ne scias, kion dirus Gandalfo. Ĉu do la tuta Provinco diskutas mian foriron?

— Ho ne! — diris Gaja. — Ne ĝenu vin pri tio! La sekreto ne longe restos kaŝita, kompreneble, sed ĉi-momente ĝi estas konata, mi supozas, nur al ni konspirantoj. Finfine, vi devas memori, ke ni tre bone konas vin, kaj ofte estas kun vi. Ni kapablas ĝenerale diveni viajn pensojn. Ankaŭ Bilbon mi konis. Se paroli la veron, mi atentis vin iom zorge ekde lia foriro. Mi pensis, ke vi pli aŭ malpli baldaŭ sekvos lin; efektive, mi atendis, ke vi jam pli frue foriros, kaj lastatempe ni iom timetis. Ni timis, ke vi eble evitos nin kaj foriros subite, tute sola, kiel faris li. Ekde la pasinta printempo ni vigle gvatis, kaj multe planadis proprakonte. Ne tiel facile vi eskapos!

— Sed mi devas iri, — diris Frodo. — Nenio malhelpas, karaj amikoj. Por ni ĉiuj estas domaĝe, sed neniel utilas, ke vi provu min reteni. Tial, ke

vi tion divenis, bonvolu helpi min kaj ne malhelpu min!

— Vi ne komprenas! — diris Grinĉjo. — Vi devas iri, kaj sekve ankaŭ ni devas iri. Gaja kaj mi iros kun vi. Sam estas bonegulo kaj por savi vin ensaltus la gorĝon de drako, se li ne stumblus kontraŭ la propraj piedoj, sed vi bezonos pli ol unu kunulon dum via danĝera aventuro.

— Miaj karaj kaj plej amataj hobitoj! — diris Frodo, profunde emociita. — Sed tion mi ne povas permesi. Ankaŭ tion mi decidis antaŭlonge. Vi parolas pri danĝero, sed vi ne komprenas. Tio ĉi estas nenia trezorserĉado, nenia vojaĝo tien-reen. Mi fuĝos el mortiga danĝero al mortiga danĝero.

— Ja ni komprenas, — diris Gaja firme. — Pro tio ni decidis kuniri. Ni scias, ke la Ringo ne estas ridindaĵo, sed ni faros nian plejeblon helpi vin kontraŭ la Malamiko.

— La Ringo? — diris Frodo, jam tute konsternita.

— Jes, la Ringo, — diris Gaja. — Kara olda hobito, vi ne enkalkulas la scivolemon de amikoj. Mi jam de jaroj scias pri ekzisto de la Ringo — fakte de antaŭ la foriro de Bilbo; sed pro tio, ke li evidente taksis tion sekreto, mi tenis en la kapo tiun scion, ĝis ni formis nian konspiron. Bilbon mi kompreneble ne konis tiel bone, kiel vin; mi estis tro juna, kaj li ankaŭ estis pli singarda — sed ne sufiĉe singarda. Se vi deziras scii, kiel mi eltrovis, tion mi rakontos al vi.

— Bonvolu! — diris Frodo malforte.

— Lia stumblilo estis kompreneble la Retikul-Baginzoj, kiel oni eble atendus. Iun tagon, unu jaron antaŭ la Festo, hazarde mi marŝis laŭ la vojo, kiam mi vidis Bilbon antaŭ mi. Subite en la malproksimo vidiĝis la Retikul-Baginzoj, alvenante. Bilbo malrapidigis la paŝojn, kaj poste pum! li malaperis. Mi tiel surpriziĝis, ke mi apenaŭ havis volpreton por min kaŝi laŭ maniero pli normala; sed mi trairis la heĝon kaj marŝis interne laŭ la kampo. Mi tragvatis al la vojo, post paso de la Retikul-Baginzoj kaj rigardis rekte al Bilbo, kiam subite li reaperis. Mi ekvidis brileton de oro, kiam li remetis ion en sian pantalonpoŝon. Poste mi vigle atentis. Fakte, mi konfesas, ke mi spionis. Sed vi devas konfesi, ke tio estis tre interesa, kaj mi estis nur adoleskanto. Certe mi estas la sola en la Provinco krom vi, Frodo, kiu iam vidis la sekretan libron de la oldulo.

— Vi legis lian libron! — kriis Frodo. — Bona ĉielo supre! Ĉu nenio estas sekura?

— Ne tro sekura, laŭ mia opinio, — diris Gaja. — Sed mi sukcesis nur pri unu rapida ekrigardo, kaj tio estis malfacile atingebla. Li neniam lasis kuŝanta la libron. Mi scivolas, kio okazis al ĝi. Mi ŝatus rigardi ĝin denove. Ĉu vi havas ĝin, Frodo?

— Ne. Ĝi ne estis en Bag-Endo. Certe li forportis ĝin.

— Nu, kiel mi diris, — Gaja daŭrigis, — mi tenis sekreta mian scion, ĝis la pasinta printempo, kiam la aferoj serioziĝis. Tiam ni formis nian konspirantaron; kaj ĉar ankaŭ ni estis seriozaj kaj intencis sukcesi, ni ne tro skrupulis. Vi estas nukso ne tro facile rompebla, kaj Gandalfo malpli. Sed se vi volas prezentiĝi al nia ĉefa esploranto, mi povas lin aperigi.

— Kie li estas? — diris Frodo, ĉirkaŭrigardante, kvazaŭ li atendus, ke maskita kaj minaca figuro venos el iu ŝranko.

— Paŝu antaŭen, Sam! — diris Gaja, kaj Sam stariĝis kun vizaĝo skarlata ĝis la oreloj. — Jen nia informkolektanto! Kaj li multon kolektis, mi povas diri al vi, antaŭ ol li estis fine kaptita. Post tio, estas dirende, li ŝajnis taksi sin honorligita kaj tute silentiĝis.

— Sam! — kriis Frodo, sentante, ke surprizego atingis sian limon, kaj tute ne povante decidiĝi, ĉu li koleriĝas, amuziĝas, malŝarĝitas, aŭ simple sentas sin stulta.

— Jes, sinjoro! — diris Sam. — Pardonpete, sinjoro! Sed mi intencis nenian mison al vi, s-ro Frodo, nek al s-ro Gandalfo, cetere. Al *li* ne mankas sagaco, vidu; kaj kiam vi volis iri sola, li diris: “Ne! kunprenu iun, kiun vi povas fidi”.

— Sed ŝajnas, ke neniun mi povas fidi, — diris Frodo. Sam rigardis lin malfeliĉe.

— Ĉio dependas de viaj deziroj, — enmetis Gaja. — Vi povas fidi, ke ni subtenos vin tra ĉiuj danĝeroj — ĝis la fina fino. Kaj vi povas fidi, ke tiun vian sekreton ni gardos, pli firme ol vi mem ĝin gardas. Sed vi ne povas fidi, ke ni permesos al vi fronti problemojn sola, aŭ foriri senvorte. Ni estas viaj amikoj, Frodo. Ĉiuokaze, jen la afero. Ni konas la plimulton de tio, kion Gandalfo rakontis al vi. Ni scias multon pri la Ringo. Ni terure timas — sed ni akompanos vin; aŭ sekvos vin kvazaŭ dogoj.

— Kaj finfine, sinjoro, — aldonis Sam, — vi devus akcepti la konsilon de la elfoj. Gildoro diris, ke vi devus kunpreni la volontajn, kaj tion vi ne rajtas nei.

— Tion mi ne neos, — diris Frodo, rigardante al Sam, kiu nun ridetaĉis. — Mi tion ne neos, sed mi neniam plu kredos, ke vi dormas, ĉu aŭ ne vi ronkos. Mi piedbatos vin dolore, por esti certa. Vi estas aro da friponoj komplotemaj! — li diris, turnante sin al la aliaj. — Sed estu benataj! — li ridis, stariĝante kaj flirtigante la brakojn, — mi cedas. Mi sekvos la konsilon de Gildoro. Se la danĝero ne estus tiom malhela, mi dancus pro ĝojo. Malgraŭ ĉio, mi ne povas ne senti feliĉon; pli da feliĉo ol mi jam delonge sentis. Tiun ĉi vesperon mi antaŭtimegis.

— Bone! Jen decidite. Tri huraoj por Kapitano Frodo kaj lia kunularo! — ili kriis; kaj ili ĉirkaŭdancis lin. Gaja kaj Grinĉjo komencis kanton, kiun

ili evidente pretigis por la okazo.

Ĝi estis farita laŭ modelo de la gnom-kanto, kiu ekirigis Bilbon al ties aventuro antaŭlonge, kaj havis la saman melodion.

Adiaŭ al kamen' kaj hal'!
Eĉ malgraŭ vent' kaj pluvofal',
ni devas for ĝis tagaŭror'
trans alta monto kaj arbar'.

Ĝis Rivendel', la elf-kastel'
en maldenset' nebula de l'
erika vast', en rajda hast'
kaj kien poste? — jen mister'.

Danĝerproksim' kaj granda tim',
ni dormos sub ĉiela lim',
ĝis ĉesos ĝen' de nia pen',
kaj venos ni al vojaĝfin'.

Ni devas for! Ni devas for!
Ni rajdos antaŭ la aŭror'!

— Tre bone! — diris Frodo. — Sed tiukaze restas multaj farotaĵoj antaŭ ol ni enlitiĝos — sub tegmento, almenaŭ hodiaŭ nokte.

— Ho! Tio estis poezio! — diris Grinĉjo. — ĉu vi vere intencas ekvojaĝi antaŭ la aŭroro?

— Mi ne scias, — respondis Frodo. — Mi timas tiujn Nigrajn Rajdantojn, kaj mi certas, ke estas malsekure resti sur unu loko longe, precipe sur loko, pri kiu estas sciate, ke mi iris tien. Cetere Gildoro konsilis, ke mi ne atendu. Sed mi tre ŝatus renkonti Gandalfon. Mi povis vidi, ke eĉ Gildoro estis maltrankviligita, kiam li aŭdis, ke Gandalfo neniam aperis. Vere dependas de du aferoj. Kiel baldaŭ povus la Nigraj Rajdantoj atingi Bokelboron? Kaj kiel baldaŭ povus ni ekiri? Tio postulos multe da preparado.

— La respondo al la dua demando, — diris Gaja, — estas, ke ni povus ekvojaĝi post unu horo. Mi preparis preskaŭ ĉion. En stalo trans la kampoj troviĝas ses poneoj; bezonaĵoj kaj iloj estas ĉiuj pakitaj, krom kelkaj aldonaj vestaĵoj kaj la malfreŝiĝontaj manĝaĵoj.

— Ŝajnas, ke tio estas konspiro tre plenumkapabla, — diris Frodo. — Sed kio pri la Nigraj Rajdantoj? Ĉu estus sekure atendi dum unu tago Gandalfon?

— Dependas de tio, kion farus la Rajdantoj, laŭ via opinio, se ili trovus vin ĉi tie, — respondis Gaja. — Ili povus veni jam nun, kompreneble, se ili

ne estus haltigitaj ĉe la Norda Pordego, kie la Heĝo proksimiĝas al la riverbordo, ĝuste ĉi-flanke de la Ponto. La pordogardistoj ne tralasus ilin dumnokte, kvankam ili eble trarompus. Eĉ dumtage oni eble provus haltigi ilin, laŭ mia opinio, almenaŭ ĝis oni sendus mesaĝon al la Estro de la Halo — ĉar ne plaĉus al ili la aspekto de la Rajdantoj, kaj certe oni timus ilin. Sed kompreneble Boklando ne kapablas rezisti longe atakon ferocan. Kaj estas eble, ke matene oni tralasus eĉ Nigran Rajdanton, kiu alrajdus kaj demandus pri s-ro Baginzo. Estas sufiĉe vaste konate, ke vi revenos por loĝadi en Stretkavo.

Frodo sidis pensante dum kelka tempo.

— Mi decidiĝis, — li diris fine. — Mi ekvojaĝos morgaŭ, tuj kiam tagiĝos. Sed mi ne iros sur la vojo: estus pli sekure resti ĉi tie, ol tio. Se mi trairos la Nordan Pordegon, mia foriro el Boklando estos tuj konata, anstataŭ resti sekreta dum almenaŭ kelkaj tagoj, kiel povus okazi. Kaj cetere, la Ponto kaj la Orienta Vojo proksime al la landlimoj estos certe vaĉataj, ĉu aŭ ne iu Rajdanto sukcesos eniri al Boklando. Ni ne scias, kiom multaj ili estas, sed estas almenaŭ du, eble pli. La sola farindaĵo estas forvojaĝi laŭ direkto tute neatendita.

— Sed tio nepre signifas eniri la Malnovan Arbaron! — diris Fredegaro, konsternite. — Vi ne povas tion fari. Ĝi estas almenaŭ tiel danĝera kiel la Nigraj Rajdantoj.

— Ne tute, — diris Gaja. — Tio sonas tre riskoplene, sed mi opinias, ke Frodo pravas. Ĝi estas la sola ebleco ekiri, ne tuj sekvote. Kun bonŝanco ni eble okazigus atentindan interspacon.

— Sed neniom da bonŝanco vi havos en la Malnova Arbaro, — kontraŭdiris Fredegaro. — Neniu iam trovas bonŝancon tie. Vi perdos la direkton. Oni ne eniras tien.

— Nu tamen, oni eniras! — diris Gaja. — La Brandobokoj eniras — de tempo al tempo, kiam tio venas al ili en la kapon. Ni havas privatan enirejon. Frodo eniris unu fojon, antaŭlonge. Mi jam eniris plurfoje: kutime dum taglumo, kompreneble, kiam la arboj estas dormemaj kaj relative kvietaj.

— Nu, faru laŭ via bontrovo! — diris Fredegaro. — Mi timas la Malnovan Arbaron pli ol ion ajn konatan al mi: la rakontoj pri ĝi estas koŝmaraj; sed mia voĉdono apenaŭ enkalkuliĝas, ĉar mi ne partoprenos la vojaĝon. Tamen mi estas tre kontenta, ke iu postrestas, kiu povos rakonti al Gandalfo viajn faraĵojn, kiam li ekaperos, kiel li certe faros post nelonge.

Malgraŭ sia amo al Frodo, Dikulo Bolĝero tute ne emis forlasi la Provincon, nek vidi tion, kio troviĝis ekster ĝi. Lia familio devenis de la Orienta Kvarono, fakte de Buĝfordo en Pontokampoj, sed li neniam estis

transirinta la Brandovinan Ponton. Lia tasko, laŭ la origina plano de la konspirintoj, estis postresti kaj pritrakti scivolemulojn kaj daŭrigi kiel eble plej longe la ŝajnigon, ke s-ro Baginzo plu loĝadas en Stretkavo. Li eĉ alportis iujn malnovajn vestaĵojn de Frodo por pli bone ludi tiun rolon. Oni malmulte antaŭvidis, kiel danĝera tiu rolo eble pruviĝos.

— Bonege! — diris Frodo, kiam li komprenis la planon. — Aliel ni ne povus postlasi iun mesaĝon por Gandalfo. Mi ne scias, kompreneble, ĉu tiuj Rajdantoj scias legi, sed mi ne riskus postlasi mesaĝon skribitan, pro la ebleco, ke ili sukcesus eniri kaj traserĉi la domon. Sed se Dikulo volontas gardi la fortikaĵon, kaj mi povas esti certa, ke Gandalfo informiĝos pri nia irdirekto, tio decidigas min. Mi iros al la Malnova Arbaro plej frue morgaŭ.

— Nu, decidite, — diris Grinĉjo. — Mi entute preferas nian taskon ol tiun de Dikulo — atendi ĉi tie ĝis alveno de la Nigraj Rajdantoj.

— Nur atendu ĝis vi troviĝos interne de la Arbaro, — diris Fredegaro. — Vi deziros esti ĉi tie kun mi antaŭ tiu ĉi sama horo morgaŭ.

— Ne valoras plu disputi pri ĉio ĉi, — diris Gaja. — Ankoraŭ necesas ordigi kaj kompletigi la pakadon antaŭ ol enlitiĝi. Mi vekos vin ĉiujn frumatene.

Kiam Frodo fine enlitiĝis, li dum kelka tempo ne povis ekdormi. Liaj kruroj doloris. Li ĝojis, ke matene li rajdos. Fine li dormiĝe eniris svagan sonĝon, dum kiu li ŝajnis elrigardi tra alta fenestro super malhela maro da arboj implikitaj. Sube inter la radikoj aŭdiĝis sono de estaĵoj, rampantaj kaj snufantaj. Li estis certa, ke tiuj pli aŭ malpli baldaŭ flartrovos lin.

Poste li aŭdis bruon en la malproksimo. Unue li supozis tion forta ventego alvenanta trans la foliaro de l' arbaro. Poste li komprenis, ke tio ne estas foliaro, sed la sono de la malproksima Maro; sono, kiun li neniam aŭdis dum la maldorma vivo, kvankam ĝi ofte perturbis liajn sonĝojn. Subite li trovis sin en senŝirma ekstero. Ne estis arboj finfine. Li staris sur malgranda erikejo, kaj en la aero estis granda salodoro. Rigardante supren, li vidis altan blankan turon, kiu staris sola sur alta firsto. Inundis lin forta deziro grimpi la turon por vidi la maron. Li komencis barakte supreniri la firston al la turo: sed subite lumo ekbrilis en la ĉielo, kaj aŭdiĝis tondrobruo.

6

La Malnova Arbaro

Frodo vekiĝis subite. Ankoraŭ estis mallume en la ĉambro. Tie staris Gaja, kun kandelo en unu mano, frapante per la alia la pordon.

— Bone! Kio estas? — diris Frodo, ankoraŭ surprizita kaj misorientita.

— Kio estas! — kriis Gaja. — Estas jam tempo ellitiĝi. Estas duono post la kvara kaj tre nebule. Ek al! Sam jam pretigas matenmanĝon. Eĉ Grinĉjo estas vestita. Mi ĝuste iras seli la poneojn, kaj alvenigi tiun, kiu portos la pakaĵojn. Veku tiun dormemulon Dikulo! Li devas almenaŭ leviĝi kaj adiaŭi nin.

Baldaŭ post la sesa horo la kvin hobitoj estis pretaj ekvojaĝi. Dikulo Bolĝero daŭre oscedis. Ili ŝteliris kviete el la domo. Gaja iris antaŭe, gvidante ŝarĝitan poneon, kaj direktis sin laŭ pado, kiu trairis bosketon malantaŭ la domo kaj poste transiris plurajn kampojn. La folioj sur la arboj ekglimis, kaj ĉiu branĉeto gutadis, la herbo grizis pro malvarma roso. Ĉio senmovis, kaj foraj bruetoj ŝajnis proksimaj kaj klaraj: kokinoj klukantaj en korto, iu fermanta pordon en dista domo.

La poneojn ili trovis en ties konstruaĵo; fortikaj bestetoj tiaj, kiajn ŝatis hobitoj, ne rapidaj, sed kapablaj labori dum longa tago. Ili surseliĝis, kaj baldaŭ ili forrajdis en la nebulon, kiu ŝajnis malfermiĝi nevolonte antaŭ ili kaj fermiĝi minace malantaŭ ili. Rajdinte ĉirkaŭ unu horon malrapide kaj senparole ili ekvidis la Heĝon subite aperi antaŭe. Ĝi estis alta kaj priretita je arĝentaj araneaĵoj.

— Kiel vi trapasos tion? — demandis Fredegaro.

— Sekvu min! — diris Gaja, — kaj vi vidos. — Li turniĝis maldekstren laŭ la Heĝo, kaj baldaŭ ili alvenis punkton, kie ĝi kurbiĝis internen, laŭirante la randon de ravino. Fosaĵo estis iam farita, iom malproksime de la Heĝo, kaj ĝi subeniris malabrupte en la teron. Ĝi havis flanke brikmurojn, kiuj altiĝis grade, ĝis subite ili arkiĝis kaj formis tunelon, kiu plonĝis sub la Heĝon kaj eliris en la ravino aliflanke.

Tie haltis Dikulo Bolĝero.

— Adiaŭ, Frodo! — li diris. — Mi preferas ke vi ne foriru en la Arbaron. Mi nur esperas, ke antaŭ la tagofino vi ne bezonos savanton. Sed bonŝancon al vi — hodiaŭ kaj ĉiutage!

— Se antaŭe ne troviĝos io pli malbona ol la Malnova Arbaro, mi estos

bonŝanca, — diris Frodo. — Diru al Gandalfo, ke li rajdu laŭ la Orienta Vojo: ni baldaŭ mem reatingos ĝin kaj laŭiros ĝin kiel eble plej rapide.

— Adiaŭ! — ili kriis, kaj rajdis malsupren sur la deklivo kaj malaperis el la vido de Fredegaro en la tunelon.

Tiu estis malluma kaj humida. Ĉe la alia fino ĝi estis fermita per pordo el dikaj ferfostoj. Gaja elseliĝis kaj malŝlosis la pordon, kaj kiam ili ĉiuj jam trapasis li puŝfermis ĝin denove. Ĝi fermiĝis kun tintego, kaj la seruro klakis. La sono estis misaŭgura.

— Jen! — diris Gaja. — Ni forlasis la Provincon kaj jam troviĝas ekstere, rande de la Malnova Arbaro.

— Ĉu la rakontoj pri ĝi estas veraj? — demandis Grinĉjo.

— Mi ne scias, kiujn rakontojn vi aludas, — Gaja respondis. — Se vi aludas la malnovajn timigrakontojn, kiujn rakontis al Dikulo liaj vartistinoj, pri goblenoj, lupoj kaj tiaj aĵoj, mi juĝas, ke ne. Ĉiuokaze mi ne kredas ilin. Sed la Arbaro estas stranga. Ĉio en ĝi estas multe pli vigla, pli konscia pri okazaĵoj, por tiel diri, ol en la Provinco. Kaj al la arboj ne plaĉas fremduloj. Ili gvatas vin. Ili kutime kontentas nur gvati vin, dum daŭro de la taglumo, kaj faras malmulton. De tempo al tempo la malplej amikecaj eble faligos branĉon, aŭ elpuŝos radikon, aŭ kroĉiĝos al vi per longa pendaĵo. Sed nokte la okazaĵoj povas esti tre timigaj, kiel oni diris al mi. Nur unu-du fojojn mi estis ĉi tie post la noktiĝo, kaj nur proksime al la Heĝo. Ŝajnis al mi, ke ĉiuj arboj interflustris, transdonante novaĵojn kaj komplotojn per lingvo nekomprenebla, kaj la branĉoj svingiĝis kaj palpserĉis tute sen vento. Oni fakte diras, ke la arboj ja efektive moviĝas, kaj kapablas ĉirkaŭfermi fremdulojn. Efektive, antaŭlonge ili atakis la Heĝon: ili alvenis kaj plantis sin tute apud ĝi, kaj kliniĝis trans ĝin. Sed alvenis la hobitoj kaj detranĉis centojn da arboj kaj konstruis grandan fajron en la Arbaro, kaj bruligis la tutan teron laŭ longa strio oriente de la Heĝo. Post tio la arboj rezignis la atakon, sed iĝis tre neamikaj. Ankoraŭ ekzistas larĝa nuda loko ne fore interne, kie oni bruligis la fajron.

— Ĉu nur la arboj estas danĝeraj? — demandis Grinĉjo.

— Loĝas diversaj strangaĵoj profunde en la Arbaro, kaj je la kontraŭa flanko, — diris Gaja, — aŭ almenaŭ tion mi aŭdis; sed mi neniam vidis ion tian. Sed iu konstruas padojn. Kiam ajn oni venas internen, oni trovas liberajn irejojn; sed ili ŝajnas formoviĝi kaj ŝanĝiĝi de tempo al tempo laŭ stranga maniero. Ne malproksime de tiu ĉi tunelo troviĝas, aŭ longe troviĝis, komenciĝo de iom larĝa pado kondukanta al la Fajra Apertejo, kaj poste antaŭen pli-malpli laŭ nia direkto, orienten kaj iom norden. Tiun padon mi klopodos trovi.

Nun la hobitoj forlasis la tunelpordon kaj rajdis trans la larĝan kavon.

Aliflanke vidiĝis malklara padeto suprengvidanta ĝis la subaĵo de l’ Arbaro, cent jardojn kaj pli for de la Heĝo; sed ĝi malaperis tuj, kiam ĝi estis kondukinta ilin sub la arbojn. Rerigardante ili povis vidi la malhelan linion de la Heĝo tra la arbotrunkoj, kiuj jam densis ĉirkaŭ ili. Rigardante antaŭen ili povis vidi nur arbotrunkojn de sennombraj grandecoj kaj formoj: rektaj aŭ kurbaj, torditaj, kliniĝantaj, stumpaj aŭ gracilaj, glataj aŭ nodozaj kaj branĉohavaj; ĉiuj trunkoj estis verdaj aŭ grizaj pro musko kaj ŝlimaj vilaj kreskaĵoj.

Sole Gaja ŝajnis sufiĉe kontenta.

— Vi prefere gvidu antaŭen kaj trovu tiun padon, — Frodo diris al li. — Ni ne perdu unu la aliajn, aŭ forgesu la direkton al la Heĝo!

Ili elektis irejon inter arboj, kaj iliaj poneoj obstine antaŭeniris, zorge evitante la multajn tordiĝantajn kaj interplektitajn radikojn. Mankis subkreskaĵo. La tereno grade supreniĝis, kaj dum ili antaŭeniris, ŝajnis, ke la arboj altiĝas, malheliĝas kaj densiĝas. Neniu sono aŭdiĝis, krom okaza malsekaĵo gutanta tra la senmovajn foliarojn. Provizore mankis flustrado kaj moviĝado inter la branĉoj; sed ili ĉiuj spertis maltrankvilan senton, ke ili estas gvatataj malaprobe, kio profundiĝis ĝis malŝate kaj eĉ malamike. Tiu sento po iom kreskis, ĝis ili trovis, ke ili eksuprenrigardis rapidege, aŭ retrorigardis trans la ŝultron, kvazaŭ ili atendus subitan baton.

Ankoraŭ ne vidiĝis signo de pado, kaj la arboj ŝajnis konstante bari al ili la vojon. Grinĉjo subite sentis, ke tion li ne plu povas toleri, kaj senaverte li elpuŝis krion.

— Hej! Hej! — li kriis. — Nenion mi intencas fari. Nur lasu min trapasi!

La aliaj haltis surprizite; sed la krio falis kvazaŭ sordinita per peza kurteno. Venis nenia eĥo aŭ respondo, kvankam ŝajnis, ke la Arbaro iĝis pli densa kaj pli atenta ol antaŭe.

— Sur via loko mi ne krius, — diris Gaja. — Tio pli damaĝas ol utilas.

Frodo komencis pripensi, ĉu estas eble trovi travojon, kaj ĉu li prave devigis la aliajn eniri tiun abomenindan Arbaron. Gaja rigardis de flanko al flanko, kaj jam ŝajnis malcerta pri la irota direkto. Grinĉjo rimarkis tion.

— Vi ne bezonis longe por perdigi al ni la vojon, — li diris. Sed tiumomente Gaja fajfis malŝarĝiĝe kaj indikis antaŭen.

— Nu, nu! — li diris. — Tiuj arboj ja dismoviĝas. Jen antaŭ ni la Fajra Apertejo, mi tion esperas, sed la pado al ĝi ŝajne formoviĝis!

La lumo iĝis pli klara, kiam ili antaŭeniris. Subite ili eliris el inter la arboj kaj trovis sin en larĝa ronda interspaco. Troviĝis ĉielo supre, surprize al ili blua kaj klara, ĉar sub la Arbar-tegmento ili ne povis vidi la leviĝantan matenon kaj la foriron de l’ nebuleto. Tamen la suno ankoraŭ ne estis sufiĉe

alta por brili rekte en la interspacon, kvankam ĝia lumo banis la arbosuprojn. Ĉiuj folioj estis pli densaj kaj pli verdaj ĉirkaŭ la rando de la apertejo, enfermante ĝin per preskaŭ solida muro. Neniuj arboj kreskis tie, nur malneta herbo kaj multaj altaj plantaĵoj: tigopuŝaj kaj paliĝintaj konioj kaj arbaraj petroseloj, epilobio semiĝanta je lantugaj cindroj kaj abundaj urtikoj kaj kardoj. Splena loko: sed ĝi ŝajnis ĉarma kaj ĝoja ĝardeno post la enfermita Arbaro.

La hobitoj sentis kuraĝiĝon kaj suprenrigardis esperplene al la larĝiĝanta taglumo sur la ĉielo. Aliflanke de la apertejo troviĝis breĉo en la arbomuro kaj senobstakla pado. Ili povis vidi, ke ĝi eniras en la Arbaron, ie-tie larĝa kaj supre aperta, kvankam en kelkaj lokoj la arboj proksimis kaj superombris ĝin per siaj malhelaj branĉoj. Laŭ tiu pado ili rajdis. Ili ankoraŭ supreniris malabrupte, sed nun ili iris multe pli rapide, kaj pli kuraĝe; ĉar ŝajnis al ili, ke la Arbaro malseveriĝis kaj intencis tralasi ilin finfine nemalhelpante.

Sed post iom da tempo la aero komengis iĝi varma kaj sufoka. Denove la arboj enpremiĝis ambaŭflanke, kaj ili ne plu povis vidi antaŭen. Nun ili sentis pli ol iam forte la malbonintencon de la Arbaro alpremantan al ili. Estis tiel silente, ke la paŝado de la poneaj hufoj, susuranta sur mortintaj folioj kaj foje stumblanta pro kaŝitaj radikoj, ŝajnis batsoni en iliaj oreloj. Frodo provis kanti por kuraĝigi ilin, sed lia voĉo nur murmuris.

Vaguloj en la lando ombra
ne malesperu! Kvankam sombra,
Arbaro devas fine cedi,
kaj vidi sunon pretertredi:
subira suno, suno veka,
la tagofin', aŭ tago eka.
Arbaroj ĉiuj fine falas...

Falas — sed ĝuste kiam li prononcis tiun vorton, lia voĉo forvelkis mutiĝe. La aero ŝajnis peza kaj la kreado de vortoj laciga. Ĝuste malantaŭ ili branĉego defalis de maljuna transpenda arbo, kraksone sur la padon. La arboj ŝajnis enfermiĝi antaŭ ili.

— Al ili ne plaĉas ĉio ĉi pri finoj kaj faloj, — diris Gaja. — Prefere ne plu kantu intertempe. Atendu ĝis ni ja atingos la randon, kaj tiam ni turnos nin kaj regalos ilin per laŭta kunkanto!

Li parolis ĝojplene, kaj se li spertis iun antaŭtimon, li tion ne evidentigis. La aliaj nenion respondis. Ili estis deprimitaj. Pezo pograde premis la koron de Frodo, kaj li jam bedaŭris kun ĉiu paŝo antaŭen, ke li pensis defii la minacon de la arboj. Li estis fakte ĝuste haltonta kaj

propononta reiron (se tio ankoraŭ eblis), kiam okazis io nova. La pado ĉesis supreniri, kaj iĝis dum kelka tempo preskaŭ ebena. La mallumaj arboj flankeniĝis, kaj antaŭe ili povis vidi la padon, kiu etendiĝis preskaŭ sendevie rekten. Antaŭ ili, sed iom fore, staris verda montetoverto, senarba, leviĝanta kvazaŭ kalva kapo el la ĉirkaŭanta Arbaro. La pado ŝajnis konduki rekte al ĝi.

Ili denove ekrapidis antaŭen, ĝojigitaj pro la penso, ke ili elrampos dum kelka tempo super la tegmenton de l' Arbaro. La pado subeniris, poste komencis denove supreniri, gvidante ilin finfine ĝis la subo de l' apika montetoflanko. Tie ĝi forlasis la arbojn kaj malaperis en gazonon. La Arbaro tute ĉirkaŭis la monteton kvazaŭ densa hararo, kiu abrupte finiĝis je cirklo ĉirkaŭ la razita verto.

La hobitoj kondukis siajn ponecjn supren, rondirante ĝis ili atingis la supron. Tie ili stariĝis kaj rigardis ĉirkaŭen. La aero estis glima kaj sunluma, sed nebuleta; kaj ili ne povis ĝisvidi tre malproksimen. En la proksimo la nebulo jam preskaŭ foriris; tamen ie-tie ĝi kuŝis en kavaĵoj de la Arbaro, kaj sude de ili, el profunda faldaĵo, kiu tute trastrekis la Arbaron, nebulo plu leviĝis kvazaŭ vaporo aŭ strietoj da blanka fumo.

— Tie, — diris Gaja, fingromontrante, — estas la linio de la Videvindlo. Ĝi defluas el la Montetaro kaj fluas sud-okcidenten tra l' Arbaromezo por aliĝi al Brandovino ĉe Fojnofino. Ne laŭ *tiu* vojo ni volas iri! La Videvindla valo estas laŭdire la plej stranga parto de la tuta Arbaro — la centro, el kiu venas la tuta strangeco, se tiel diri.

La aliaj rigardis en la direkton indikitan de Gaja, sed ili povis vidi malmulte pli ol nebulon super la malseketa kaj forte-fendita valo; kaj poste la suda duono de l' Arbaro forfadiĝis el la vidokampo. La suno ĉe la montetosupro jam komencis varmegiĝi. Certe estis ĉirkaŭ la dek-unua horo; sed la aŭtuna malklaro ankoraŭ malhelpis, ke ili multon vidu alidirekten. Okcidente ili ne povis distingi la linion de la Heĝo aŭ la valon de Brandovino post ĝi. Norde, kien ili rigardis plej esperplene, ili vidis nenion, kio povus esti la linio de la Granda Orienta Vojo, al kiu ili celis. Ili troviĝis sur insulo en maro da arboj, kaj la horizonto estis vualita.

Ĉe la sud-orienta flanko, la tero forfalis tre apike, kvazaŭ la deklivoj de la monteto daŭrus profunden sub la arboj, kiel insulstrandoj, kiuj estas efektive montflankoj leviĝantaj el profunda akvo. Ili sidiĝis sur la verda rando kaj elrigardis trans la arbarojn subajn, dum ili maĉis sian tagmanĝon. Dum la suno altiĝis kaj pasis tagmezon, ili ekvidis malproksime en la oriento la grizverdajn liniojn de la Montetaro kuŝanta aliflanke de la Malnova Arbaro. Tio multe ĝojigis ilin, ĉar estis bone vidi ion ajn post la arbarlimoj, kvankam ili ne intencis iri tiudirekten, se iel eblus: la Montetaro

estis tiel same misreputacia, kiel la Arbaro mem.

Finfine ili decidis pluiri. La pado, kiu gvidis ilin al la monteto reaperis ĉe la norda flanko; sed ili ne longe laŭiris ĝin antaŭ ol ili konsciiĝis, ke ĝi kurbiĝas seninterrompe dekstren. Baldaŭ ĝi komencis rapide malsupreniri, kaj ili divenis, ke certe ĝi direktiĝis efektive al la Videvindla valo: tute ne la direkto, laŭ kiu ili volis iri. Post iom da diskuto ili decidis forlasi tiun misgvidan padon kaj ekiri norden, ĉar kvankam tion ili ne vidis de la monteta supro, la Vojo devis troviĝi tiudirekte, kaj ne povis malproksimi multajn mejlojn. Cetere, norde kaj maldekstre de la pado, la tereno ŝajnis pli seka kaj pli aperta, suprenirante al deklivoj, kie la arboj estis malpli densaj, kaj la pinoj kaj abioj anstataŭis la kverkojn kaj fraksenojn kaj aliajn fremdajn kaj sennomajn arbojn de la pli densa Arbaro.

Komence tiu elekto ŝajnis bona: ili progresis sufiĉe rapide, kvankam kiam ajn ili ekvidis la sunon en nefermitejo, neklarigeble ŝajnis, ke ili devojiĝis orienten. Sed post iom da tempo la arboj komencis enfermi ilin denove, ĝuste tie, kie ili defore aspektis malpli densaj kaj malpli interplektitaj. Poste profundaj sulkoj estis trovitaj neatendite, kvazaŭ enpremaĵoj de gigantaj radegoj, larĝaj defendfosaĵoj aŭ enfositaj vojetoj delonge neuzitaj kaj ŝtopitaj je dornarbustoj. Tiuj kutime kuŝis laŭlarĝe de ilia irdirekto, kaj oni povis trairi ilin nur per grimpado suben-supren, kio tre ĝenis kaj malfacilis al la poneoj. Ĉiufoje kiam ili subengrimpis, ili trovis, ke la kavon plenigas densaj arbustoj kaj interplektita subkreskaĵo, kiuj iel ne cedis maldekstren, sed nur lasis vojon kiam ili turniĝis dekstren, kaj ili devis iom iri sur la fundo antaŭ ol trovi eliron supren laŭ la kontraŭa deklivo. Ĉiufoje, kiam ili elgrimpis, la arboj ŝajnis pli densaj kaj pli mallumaj; kaj ĉiam estis pli malfacile trovi vojon maldekstren kaj supren, kaj ili estis devigataj iri dekstren kaj suben.

Post unu-du horoj ili jam tute perdis klaran direktosenton, kvankam ili tre bone sciis, ke ili jam delonge ĉesis iri norden. Ili estis misdirektataj kaj simple sekvis vojon elektitan por ili — orienten kaj suden, en la koron de la Arbaro kaj ne el ĝi.

La posttagmezo estis forpasiĝema, kiam ili grimpis kaj stumblis en ravinon pli larĝan kaj pli profundan ol iu ajn pli frue trafita. Ĝiaj randoj estis tiel apikaj kaj altaj, ke pruviĝis neeble elgrimpi, ĉu antaŭen ĉu malantaŭen, ne postlasinte siajn poneojn kaj pakaĵojn. Eblis nur laŭiri la ravinon — malsupren. La tero iĝis mola, foje marĉa; fontoj aperis sur la deklivoj, kaj ili baldaŭ trovis, ke ili laŭiras rojon, kiu fluetas kaj babilas sur lolokovrita bedo. Poste la tero komencis malsupreniri krute, kaj la rojo, iĝante forta kaj brua, fluis kaj saltis rapide suben tra la deklivo. Ili troviĝis en profunda malhela ravineto arkita de arboj alte super iliaj kapoj.

Plustumblinte dum kelka tempo laŭ la rojo, ili tute subite eliris el la mallumo. Kvazaŭ tra pordo ili vidis antaŭ si la sunlumon. Atinginte la aperturon ili trovis, ke ili estas subenirintaj tra fendo en alta apika deklivo, preskaŭ klifo. Ĉe ties subo estis larĝa spaco herba kaj fragmita; kaj malproksime ekvidiĝis alia deklivo preskaŭ same apika. Ora posttagmezo de malfrua sunlumo kuŝis varma kaj dormema sur la kaŝita tero inter ili. Meze de ĝi pigre serpentumis malhela brunakva rivero, borderita de antikvaj salikoj, transarkita de salikoj, malhelpata de falintaj salikoj, kaj punktita per miloj da paliĝintaj salikfolioj. Tiuj densis en la aero, flirtante flavaj de sur la branĉoj, ĉar varma kaj milda venteto blovis softe en la valo, kaj la karikoj siblis, kaj la salikobranĉoj grincis.

— Nu, nun mi almenaŭ konjektas, kie ni troviĝas! — diris Gaja. — Ni venis laŭ preskaŭ kontraŭa direkto ol tiu, kiun ni intencis. Tio estas la Rivero Videvindlo! Mi antaŭeniros esplore.

Li elpaŝis en la sunlumon kaj malaperis en la altajn herbojn. Post iom da tempo li reaperis kaj raportis, ke iom solida tereno situas inter la klifsubo kaj la rivero; en kelkaj lokoj firma razeno ĝisiris la akvorandon.

— Krome, — li diris, — ŝajnas, ke io simila al pado serpentumas laŭ la cisa flanko de la rivero. Se ni turniĝos maldekstren kaj laŭiros ĝin, ni nepre elvenos finfine je la orienta flanko de l' Arbaro.

— Povas esti! — diris Grinĉjo. — Nome, se la pado etendiĝos tiom, kaj ne simple rekondukos nin en marĉon kaj lasos nin tie. Kiu kreis la padon, laŭ via supozo, kaj kial? Mi certas, ke tio ne okazis por helpi nin. Mi iĝas tre suspektema pri tiu ĉi Arbaro kaj ĉio, kio enestas, kaj mi jam ekkredas ĉiujn onidirojn pri ĝi. Kaj ĉu vi havas koncepton pri la irota distanco orienten?

— Ne, — diris Gaja, — tion mi ne havas. Mi tute ne scias, kiomdistance ni troviĝas laŭ la Videvindlo, aŭ kiu kredeble venus sufiĉe ofte ĉi tien por krei padon. Sed ne ekzistas alia elirvojo, kiun mi povas vidi aŭ imagi.

Ĉar ekzistis neniu alia eblo, ili elspaliris, kaj Gaja gvidis ilin al la pado eltrovita de li. Ĉie la karikoj kaj herboj estis riĉaj kaj altaj, ie-tie eĉ ĝis super iliaj kapoj; sed la trovita pado estis facile irebla tra serpentumoj kaj tordiĝoj, elektanta la pli firman terenon inter marĉoj kaj lagetoj. Ie-tie ĝi transpasis aliajn rojetojn, defluantajn laŭ fendoj ĝis la Videvindlo el la pli altaj firstoj, kaj en tiaj lokoj arbotrunkoj aŭ faskoj da branĉetaro estis zorge transmetitaj.

Al la hobitoj komencis sentiĝi varme. Armeoj da diversspecaj muŝoj zumadis ĉirkaŭ iliaj oreloj, kaj la posttagmeza suno sentiĝis brule sur la dorsoj. Finfine ili alvenis subite ombrejon maldensan; grizaj branĉegoj etendiĝis trans la padon. Ĉiu paŝo antaŭen iĝis pli malvolonta ol la antaŭa. Dormemo ŝajnis rampi el la tero kaj supren laŭ la kruroj kaj fali malsovaĝe el la aero sur iliajn kapojn kaj okulojn.

Frodo sentis sian mentonon subiri kaj sian kapon kliniĝi. Proksime antaŭe Grinĉjo falis surgenuen. Frodo haltis.

— Senutile, — aŭdiĝis Gaja. — Ne eblas plu paŝi sen ripozo. Necesas dormeti. Estas friske sub la salikoj. Malpli da muŝoj!

Al Frodo ne plaĉis aŭdi tion.

— Ek al! — li kriis. — Ne eblas nun dormeti. Ni devas unue eliri el la Arbaro. — Sed la aliaj jam tro dormemis por lin atenti. Apude staris Sam oscedante kaj palpebrumante stulte.

Subite Frodo mem spertis atakon de la dormemo. Lia kapo kirliĝis. Jam aŭdiĝis en la aero preskaŭ neniu sono. La muŝoj ĉesis zumi. Nur milda bruo rande de l' aŭdkapablo, mallaŭta flirtado, kvazaŭ kanto duonflustrata, ŝajnis ekmoviĝi inter la brancoj supre. Li levis siajn pezajn okulojn kaj vidis super si kliniĝantan enorman salikon, maljunan kaj prujnecan. Giganta ĝi aspektis, ĝiaj disetendaj branĉoj suprenstreĉiĝis kvazaŭ celantaj brakoj kun multaj longfingraj manoj, ĝia nodoza kaj tordita trunko gapis per larĝaj fendoj, kiuj grincis mallaŭte pro moviĝo de l' branĉoj. Ties folioj flirtiĝantaj kontraŭ la hela ĉielo blindumis lin, kaj li falis, kaj kuŝiĝis samloke sur la herbo.

Gaja kaj Grinĉjo trenis sin antaŭen kaj kuŝiĝis, apogante la dorsojn per la salikotrunko. Malantaŭ ili la fendegoj larĝe apertis por akcepti ilin, dum la arbo balanciĝis kaj grincis. Ili suprenrigardis al la grizaj kaj flavaj folioj, kiuj milde moviĝis kontraŭ la lumo kaj kantis. Ili fermis siajn okulojn, kaj tiam ŝajnis, ke vortojn ili preskaŭ povis aŭdi, vortojn friskajn, dirantaj ion pri akvo kaj dormo. Ili sin donis al la sorĉo kaj profunde ekdormis piede de la granda griza saliko.

Frodo kuŝis dum kelka tempo luktante kontraŭ la dormo lin venkanta, poste per klopodego li restariĝis. Li spertis regantan soifon por malvarmeta akvo.

— Atendu min, Sam, — li balbutis. — Mi devas lavi piedojn momente.

Duonsonĝe li vagis antaŭen ĝis la riverflanka rando de l' arbo, kie tordiĝantaj radikegoj etendiĝis en la rivereton, kvazaŭ nodozaj draketoj streĉkliniĝantaj por trinki. Li diskruris super unu el ili, kaj padeligis siajn varmegajn piedojn en la friska bruna akvo; kaj tie ankaŭ li subite endormiĝis dorsapoge kontraŭ la arbo.

Sam sidiĝis kaj gratis al si la kapon, kaj oscedis kavernece. Li havis zorgojn. Estis malfrua posttagmezo, kaj tiu subita dormemo ŝajnis al li nenatura.

— Malantaŭ tio troviĝas pli ol suno kaj varma aero, — li murmuris al si. — Al mi ne plaĉas tiu ĉi arbego. Mi ne fidas ĝin. Aŭskultu, kiel ĝi nun kantas pri dormo! Tio ĉi tute ne taŭgas!

Li pene stariĝis, kaj treniĝis for por konstati, kio okazis al la poneoj. Li

trovis, ke du el ili jam sufiĉe forvagis laŭ la vojeto; kaj kiam li ĵus kaptis ilin kaj rekondukis ilin direkte al la aliaj, li aŭdis du bruojn; unu laŭtan kaj la alian mallaŭtan sed tre klaran. Unu estis plaŭdo de io peza, kio falis en la akvon, la alia estis brueto kiel klako de seruro, kiam pordo fermiĝas kviete kaj abrupte.

Li rekuregis al la bordo. Frodo estis en la akvo proksime al la bordo, kaj granda arbradiko ŝajnis esti super li kaj subpremi lin, sed li ne baraktis. Sam kaptis lin jake, kaj trenis lin el sub la radiko, kaj poste malfacile tiris lin sur la bordon. Preskaŭ tuj li vekiĝis, tusis kaj sputis.

— Efektive, Sam, — li diris finfine, — tiu arbaĉo min *enĵetis*! Tion mi sentis. La granda radiko simple turniĝis kaj enfaligis min!

— Supozeble vi sonĝis, s-ro Frodo, — diris Sam. — Vi ne devus sidi en tia loko, se vi sentus vin dormema.

— Kio pri la aliaj? — Frodo demandis. — Mi scivolas, kiajn sonĝojn ili spektas.

Ili ĉirkaŭiris aliflanken de la arbo, kaj tiam Sam komprenis la klakon, kiun li aŭdis. Grinĉjo estis malaperinta. La fendeto, apud kiu li kuŝiĝis, estis kunfermita, tiel ke eĉ apertureto ne videblis. Gaja estis kaptita: alia fendo fermiĝis ĉirkaŭ lia talio; liaj kruroj kuŝis ekstere, sed lia cetero estis interne de malluma aperturo, kies randoj tenegis kiel pinĉiloj.

Frodo kaj Sam batis unue la arbotrunkon, kie Grinĉjo estis kuŝinta. Poste ili freneze klopodis disigi la makzelojn de la fendo, kiu tenis kompatindan Gajan. Tute senrezulte.

— Kia fatraso! — kriis Frodo senkohere. — Kial ni entute alvenis ĉi teruran Arbaron? Se nur ni ĉiuj estus denove en Stretkavo! — Li piedbatis per sia tuta forto la arbon, ne domaĝante siajn piedojn. Apenaŭ rimarkebla tremeto trakuris la trunkon kaj supren en la branĉaron; la folioj siblis kaj flustris, sed jam kun sono de mallaŭta kaj malproksima ridado.

— Supozeble ne troviĝas hakilo en niaj pakaĵoj, s-ro Frodo? — demandis Sam.

— Mi kunportis hakileton por splitigi brullignon, — diris Frodo. — Tio ne multe utilus.

— Atendu momenton! — kriis Sam, trafite de ideo sugestita de la brulligno. — Eble ni atingus ion per fajro!

— Eble, — diris Frodo dubeme. — Ni eble sukcesus rosti vivantan Grinĉjon interne.

— Komence ni provu dolorigi aŭ timigi la arbon, — diris Sam atakeme. — Se ĝi ne ellasos ilin, mi faligos ĝin, eĉ se necesos tramaĉi ĝin. — Li kuris ĝis la poneoj kaj postnelonge revenis kun du fajrigiloj kaj hakileto.

Rapide ili kunportis sekan herbon, foliojn kaj arboŝelerojn, kaj amasigis

rompitajn branĉerojn kaj hakitajn ŝtipojn. Tiujn ili amasigis kontraŭ la trunko ĉe l' arboflanko malproksima de la kaptitoj. Kiam Sam eligis flagron el la fajrigilo, tuj ĝi ekbruligis la sekan herbon kaj supreniris agitiĝo de flamoj kaj fumo. La branĉeroj krakis. Fajrofingretoj lekis la sekan sulkiĝintan ŝelon de l' antikva arbo kaj ĝin brulmarkis. Tremo trakuris la tutan salikon. Super iliaj kapoj la folioj ŝajnis sibli laŭ sono de doloro kaj kolero. Kriego eliĝis el Gaja, kaj de la arbinterno aŭdiĝis sordinita ekkrio de Grinĉjo.

— Estingu tion! Estingu! — ekkriis Gaja. — Li premduonigos min, se vi ne. Tion li diras!

— Kiu? Kion? — bruis Frodo, ĉirkaŭkurante aliflanken de l' arbo.

— Estingu tion! Estingu! — petegis Gaja. La branĉoj de l' saliko komencis svingiĝi violente. Aŭdiĝis sono kvazaŭ de vento leviĝanta kaj disvastiĝanta ĝis la branĉoj de ĉiuj ĉirkaŭstarantaj arboj, kvazaŭ oni faligus ŝtonon en la trankvilan dormon de la rivera valo kaj kaŭzus ondetojn da kolero, kiuj trakuris la tutan Arbaron. Sam piedbatis la fajreton kaj stamfe estingis la flagraĵon. Sed Frodo, sen klara koncepto pri la kialo, laŭkuris la padon, kriante: "helpon! helpon! helpon!" Ŝajnis al li apenaŭ tolerebla la sono de la propra akratona voĉo: ĝi estis forblovita de li pere de la salikvento kaj dronis en bruego de folioj, tuj kiam la vortoj eliĝis el lia buŝo. Li sentis sin senespera: perdita kaj sensprita.

Subite li haltis. Aŭdiĝis respondo, aŭ tiel ŝajnis al li, sed ĝi ŝajnis origini de malantaŭe, malproksime laŭ la pado, fone de la Arbaro. Li sin turnis kaj aŭskultis, kaj baldaŭ ne plu estis dube; iu kantis, profunda ĝojplena voĉo kantis senzorge kaj feliĉe, sed ĝi kantis sensencaĵon:

Hej dol! gaja dol! ring a dong diljo!
Ring a dong! salta long! laŭ salika triljo!
Tom Bom, vigla Tom, Tom Bombadiljo.

Duone esperplenaj, duone timantaj iun novan danĝeron, Frodo kaj Sam jam staris senmove. Subite el longa sinsekvo da ŝajne galimatiaj vortoj la voĉo fortiĝis laŭta kaj klara kaj ekkantis jenan kanton:

Hej! Venu gaja dol! dol do! Mia luma!
Vigle flugas veter-vent' kaj la sturno pluma.
Tie sube de la Monto, en sunlumo hela,
sur la sojlo atendante ĝis fridlumo stela,
estas mia belulin', filin' Rivervirina,
svelta kiel saliker', ol akvo pli sublima.
Olda Tom Bombadiljo hejmenire plandas
kun nimfeoj en la mano, aŭdu ke li kantas!

Hej! Venu gaja dol! dol do a dero,
or-bero, or-bero, gajaflava bero!
Kompatinda Salikul', radikojn jam fortenu!
Tom hastemas. Post la tago, la vespero venu.
Tom rehejmeniras jam, la nimfeoj kvantas.
Hej! venu dero-dol! aŭdu ke li kantas!

Frodo kaj Sam staris kvazaŭ sorĉite. La vento finblovis. Denove staris silente la folioj sur branĉoj rigidaj. Sekvis alia kanteksplodo, kaj tiam subite, saltetante kaj dancante laŭ la pado, aperis super la karikoj malnova trivita ĉapelo kun alta kapingo kaj longa blua plumo ŝovita en la ĉirkaŭrandon. Post alia hopo kaj salto vidiĝis viro, aŭ tiel ŝajnis. Li ĉiuokaze estis tro granda kaj peza por esti hobito, sed ne sufiĉe altkreska por esti Grandulo, kvankam li tiomgrade bruis, plandante antaŭen kun flavaj botegoj sur la dikaj kruroj, kaj trasturmante herbon kaj karikojn kvazaŭ trinkcelanta bovino. Li havis bluan mantelon kaj longan brunan barbon, liaj okuloj bluis kaj helis, kaj lia vizaĝo ruĝis kiel matura pomo, sed centoble sulkumita pro ridado. En la manoj li portis sur foliego, kvazaŭ sur pleto, amaseton da nimfeoj.

— Helpon! — kriis Frodo kaj Sam, alkurante lin kun la manoj alstreĉitaj.

— Halt! Halt! trankviliĝu! — ekkriis la maljunulo, tenante supren unu manon, kaj ili tuj haltis, kvazaŭ rigidiĝintaj. — Nu, miaj etuloj, kien vi celas, blovante tiel balge? Kio ĝenas do? Ĉu vi scias, kiu mi estas? Mi estas Tom Bombadiljo. Sciigu la problemon! Tom hastemas. Ne premegu miajn nimfeojn!

— Miaj amikoj estas kaptitaj en la saliko, — kriis Frodo senspire.

— Premiĝas en fendo Mastro Gaja! — kriis Sam.

— Kio? — kriegis Tom Bombadiljo, saltante en la aeron. — Maljunulo Saliko? Nenio pli malbona, ĉu? Tio estas baldaŭ ĝustigota. Mi konas la taŭgan melodion. Maljuna griza Salikulo! Mi frostigos lian medolon, se li ne kondutos bone. Mi forkantos liajn radikojn. Mi kante alvokos venton kaj forblovigos foliojn kaj branĉaron. Maljunulo Saliko!

Zorge demetinte sur la herbon siajn nimfeojn, li alkuris la arbon. Tie li vidis la piedojn de Gaja ankoraŭ eliĝantaj — la cetero jam estis entirita. Tom almetis sian buŝon al la fendo kaj ekkantis en ĝin mallaŭte. La vortojn ili ne kaptis, sed evidente Gaja estis stimulita. Liaj kruroj komencis batadi. Tom forsaltis, kaj forrompinte pendantan branĉon frapis per ĝi la salikoflankon.

— Reellasu ilin, Maljunulo Saliko! — li diris. — Kion vi supozas? Vi ne devus esti vekiĝinta. Manĝu grundon! Fosu profunden! Trinku akvon!

Ekdormu! Jen parolas Bombadiljo!

Poste li kaptis la piedojn de Gaja kaj eltiris lin el la subite larĝiĝanta fendo.

Aŭdiĝis ŝira grinco kaj la alia fendo dissplitiĝis, kaj el ĝi impetis Grinĉjo, kvazaŭ piedbatite. Poste kun laŭta klako fermiĝis ambaŭ fendoj. Tremego trakuris la arbon de radikoj ĝis pinto, kaj komplete silentiĝis ĉio.

— Koran dankon! — diris la hobitoj, unu post alia. Tom Bombadiljo ekridegis.

— Nu, etuloj miaj! — diris li, kliniĝante tiel, ke li rigardis rekte iliajn vizaĝojn. — Vi akompanos min hejmen! La tablon surpezas flava kremo, mielĉelaro, kaj blanka pano kaj butero. Atendas Orbero. Konvenas demandoj dum la vespermanĝo. Sekvu min kiel eble plej rapide!

Dirinte tion li prenis siajn nimfeojn kaj poste kun invita manoflirto iris hope kaj dance laŭ la pado orienten, ankoraŭ kantante laŭte kaj sensencaĵe.

Tro surprizitaj kaj tro malŝarĝitaj por paroli, la hobitoj postsekvis lin laŭeble plej rapide. Sed tio ne estis sufiĉe rapide. Tom baldaŭ malaperis antaŭ ili, kaj la bruo de lia kantado malfortiĝis kaj malproksimiĝis. Subite lia voĉo reflosis al ili per laŭta alkrio!

Hop! antaŭen, amiketoj, laŭ la Videvindlo!
Tom antaŭeniris, ĉar necesas ilumin', do.
Okcidente sinkas Suno: baldaŭ vi malcertos.
Kiam noktaj ombroj venos, tiam pord' apertos;
tra l' fenestrovitroj lum' ekbrilos flava.
Ne timindas aino! Nek saliko ava!
Branĉon nek radikon timu! Tom nun forrapidos.
Hej nun! gaja dol! Hejme ni vin vidos!

Post tio la hobitoj nenion aŭdis plu. Preskaŭ tuj la suno ŝajnis sinki en la arbojn malantaŭ ili. Ili pensis pri la oblikva vesperlumo ekbrilanta sur la Rivero Brandovino, kaj la fenestroj en Bokelboro, kiuj komencis rebrili pro centoj da lampoj. Antaŭ ili falis ombregoj; trunkoj kaj branĉoj de arboj pendis malhele kaj minace super la pado. Blankaj flokoj da nebulo komencis leviĝi kaj kurbiĝi sur la surfaco de la rivero kaj disvagi inter la radikoj de arboj sur ĝiaj bordoj. El la tero mem sub iliaj piedoj leviĝis ombreca vaporo kaj miksiĝis kun la rapide venanta krepusko.

Iĝis malfacile sekvi la padon, kaj ili estis tre lacaj. Iliaj kruroj ŝajnis plumbecaj. Strangaj kaŝiĝemaj bruoj aŭdiĝis kure inter la ambaŭflankaj arbustoj kaj karikoj, kaj kiam ili suprenrigardis en la palan ĉielon, ili vidis kuriozajn torditajn kaj tuberajn vizaĝojn, kiuj sombris malhele kontraŭ la krepusko kaj rikanis suben al ili desur la alta remparaĵo kaj la randoj de l'

Arbaro. Ili komencis senti, ke tiu ĉi tuta tereno estas nereala, kaj ke ili trastumblas minacan sonĝon, kiu alvenas nenian vekiĝon.

Ĝuste kiam ili sentis, ke la piedoj senmoviĝas, ili rimarkis, ke la tero malabrupte supreniras. La akvo komencis murmuri. En la mallumo ili ekvidis ekblankon de ŝaŭmo, kie la rivero transfluas mallongan akvofalon. Poste la arboj subite finiĝis kaj la nebulo estis lasita malantaŭe. Ili elpaŝis el la Arbaro, kaj trovis larĝan etendaĵon da herbo baŭmanta antaŭ ili. La rivero, jam mallarĝa kaj rapida, gaje saltis renkonte al ili, jen-jen glimante pro la stelolumo, kiu jam ekbrilis surĉiele.

La herbo sub la piedoj estis glata kaj mallonga, kvazaŭ ĝi estus falĉita aŭ razita. La eĝoj de la Arbaro malantaŭe estis tonditaj, kaj netaj kiel heĝo. La pado jam vidiĝis klare antaŭ ili, bone prizorgita kaj borderita per ŝtonoj. Ĝi serpentumis supren sur la pinton de herba teraltaĵeto, jam griza sub la pala steloplena nokto; kaj tie, ankoraŭ pli alte super ili sur posta deklivo, ili vidis la ekbrilajn lumojn de iu domo. Suben denove iris la pado, kaj poste ree supren laŭ longa glata gresdeklivo al la lumo. Subite elfluis larĝa flava lumstrio hele el pordo malfermata. Tie antaŭ ili staris la domo de Tom Bombadiljo, supre, sub monteto. Malantaŭe kuŝis apika terŝultro griza kaj nuda, kaj post ĝi la malhelaj formoj de la Montetaro formarŝis en la orientan nokton.

Ĉiuj hobitoj kaj poneoj rapidis antaŭen. Jam la duono de ilia laco kaj la tuto de iliaj timoj forfalis de ili. *Hej! venu gaja dol*! elruliĝis la kanto bonvenige.

Hej! Venu deri-dol! Saltu bravaj estoj!
Al hobitoj kaj poneoj ege plaĉas festoj.
Komenciĝu la plezuro! Kantu en komuno!

Poste alia Mara voĉo, tiel juna kaj tiel antikva kiel la Printempo, Mel la kanto de feliĉa akvo defluanta en la nokton el la hela mateno sur la montetoj, alvenis falante kiel arĝento por renkonti ilin:

Komenciĝu la kantad'! Ni kantu en komuno
pri pluv', nebulo, nubvetero, suno, steloj, luno,
lumo sur foli' burĝona, roso sur la plumo,
vento sur monteta vast', tintoj sur la humo,
apudlaga karikar', lilioj ĉe l' bordero:
olda Bombadiljo kaj filino de l' Rivero!

Kaj ĉe tiu kanto la hobitoj staris antaŭ la sojlo, kaj ĉirkaŭbanis ilin ora lumo.

7

En la domo de Tom Bombadiljo

La kvar hobitoj transpaŝis la larĝan ŝtonan sojlon kaj ekstaris senmove, palpebrumante. Ili troviĝis en longa malalta ĉambro, plenigita de lumo per lampoj svingiĝantaj de la tegmentotraboj; kaj sur la tablo el malhela polurita ligno staris multaj kandeloj, altaj kaj flavaj, brulantaj hele.

Sur seĝo aliflanke de la ĉambro fronte al la dompordo, sidis virino. Ŝiaj longaj flavaj haroj ondiĝis laŭ ŝiaj ŝultroj, ŝia robo estis verda, verda kiel junaj karikoj, trastriita de arĝento kiel roseroj, kaj ŝia zono estis el oro, formita kiel ĉeno da iridoj enkrustitaj de l' palbluaj okuloj de miozotoj. Ĉirkaŭ ŝiaj piedoj en larĝaj ujoj el verda kaj bruna fajenco flosis blankaj nimfeoj, tiel ke ŝi ŝajnis surtronigita meze de lageto.

— Envenu, bonaj gastoj! — ŝi diris, kaj dum la parolo ili konstatis, ke tio estis ŝia klara voĉo, kiun ili aŭdis kantantan. Ili faris kelkajn timemajn paŝojn en la ĉambron, kaj komencis profunde riverenci, sentante sin strange surprizitaj kaj mallertaj, kiel homoj, kiuj, frapinte sur pordo de dometo por peti tason da akvo, ricevis respondon de bela juna elfreĝino vestita per vivantaj floroj. Sed antaŭ ol ili povis ekparoli, ŝi saltis facile super kaj trans la nimfeujojn, kaj kuris ridante al ili; kaj dum la kuro ŝia robo siblis mallaŭte, kiel vento tra la florbordoj de rivero.

— Venu, karaj uloj! — ŝi diris, kaptante la manon de Frodo. — Ridu, gajiĝu! Mi estas Orbero, filino de l' Rivero. — Tiam ŝi preterpasis ilin kaj, ferminte la pordon, ŝi turnis al ĝi sian dorson, kun la blankaj brakoj dismetitaj trans ĝi. — Ni elfermu la nokton! — ŝi diris. — Ĉar vi ankoraŭ timas, eble, nebulon, arbombrojn, profundan akvon kaj aĵojn sovaĝajn. Timu nenion! Ĉar hodiaŭ nokte vi estas sub la tegmento de Tom Bombadiljo.

La hobitoj ŝin rigardis mirante; kaj ŝi rigardis unuope ilin kaj ridetis.

— Bela damo Orbero! — diris Frodo finfine, sentante sian koron emociiĝi pro ĝojo, kiun li ne komprenis. Li staris kiel li foje staris sorĉite de belaj elfaj voĉoj, sed la nuna sorĉo, kiun li spertis, estis malsama: malpli akra kaj nobla estis la plezuro, sed pli profunda kaj pli proksima al la mortema koro, mirindega kaj tamen ne stranga. — Bela damo Orbero! — li denove diris. — Jam la ĝojo kaŝita en la kantoj, kiujn ni aŭdis, fariĝis klara al mi.

Gracila kiel verg’ salika! Pli ol akvo klara!
Kariko apud viva lag’! Riverfilino rara!
Printempo kaj somero kaj printempo poste plia!
Ho, vent’ sur akvofalo kaj ridado trafolia!

Subite li ĉesis kaj balbutis, venkita de surprizo, ke li aŭdis sin diri tiajn aferojn. Sed Orbero ridis.

— Bonvenon! — ŝi diris. — Mi ja ne sciis, ke la popolo de l’ Provinco estas tiel dolĉparola. Sed mi konstatas, ke vi estas elf-amiko; la lumo en viaj okuloj kaj la sonoro de via voĉo tion atestas. Jen gaja renkontiĝo! Sidiĝu nun, kaj atendu la Mastron de l’ domo! Li ne longe atendigos vin. Li prizorgas viajn lacajn bestojn.

La hobitoj volonte sidiĝis sur malaltajn kariksidilajn seĝojn, dum Orbero vigle okupiĝis pri la tablo, kaj per la okuloj ili sekvis ŝin, ĉar la gracila beleco de ŝia moviĝado plenigis ilin je kvieta ĝojo. De ie malantaŭ la domo aŭdiĝis kantado. De tempo al tempo ili konstatis, inter multaj *deri dol* kaj *gaja dol* kaj *ring-a-ding-diljo* la ripetitajn vortojn:

Olda Bombadiljo gajhumoron havas;
Bluas lia jako, kaj la botoj flavas.

— Bela damo! — diris denove Frodo post iom da tempo. — Diru al mi, se la demando ne ŝajnas al vi malsprita, kiu estas Tom Bombadiljo?

— Li estas, — diris Orbero, ĉesigante siajn rapidajn moviĝojn kaj ridetante.

Frodo ŝin rigardis demandeme.

— Li estas tia, kia vi jam vidis lin, — ŝi diris responde al tiu alrigardo. — Li estas Mastro de l’ arbaroj, akvoj kaj montetoj.

— Do la tuto de tiu ĉi stranga tereno apartenas al li?

— Tute ne! — ŝi respondis, kaj malaperis ŝia rideto. — Tio vere estus ŝarĝo, — ŝi aldonis malaltvoĉe, kvazaŭ al si. — La arboj kaj la herboj kaj ĉio, kio kreskas aŭ vivas ĉi tie, ĉiuj apartenas al si. Tom Bombadiljo estas la Mastro. Neniu iam ajn ekkaptis oldan Tom marŝantan en la arbaro, vadantan en la akvo, saltantan sur la montetoj sub lumo kaj ombro. Timon li malhavas. Tom Bombadiljo estas la Mastro.

Malfermiĝis pordo kaj envenis Tom Bombadiljo. Nun li ne portis ĉapelon kaj lia densa bruna hararo estis kronita per aŭtunaj folioj. Li ridis, kaj irinte al Orbero, ekkaptis ŝian manon.

— Jen mia bela damo! — li diris, riverencante al la hobitoj. — Jen mia Orbero vestita tute en arĝentverdo kun floroj en la zono! Ĉu la tablo estas ŝarĝita? Mi vidas flavan kremon kaj mielĉelaron, kaj blankan panon, kaj buteron; lakton, fromaĝon, verdajn aromherbojn kaj maturajn berojn

kolektitajn. Ĉu tio sufiĉas al ni? ĉu la vespermanĝo pretas?

— Pretas, — diris Orbero, — sed eble ne la gastoj? Tom klakigis siajn manojn kaj ekkriis:

— Tom, Tom! viaj gastoj estas lacaj, kaj vi preskaŭ tion forgesis! Venu do, miaj gajaj amikoj, kaj Tom refreŝigos vin! Vi purigos manojn malpurajn, kaj lavos la lacajn vizaĝojn; forĵetos la mantelojn kotŝmiritajn kaj trakombos viajn implikitajn harojn!

Li malfermis la pordon, kaj ili sekvis lin laŭ mallonga pasejo kaj ĉirkaŭ akutan turniĝon. Ili venis ĝis malalta ĉambro kun klinita tegmento (aldonaĵo, ŝajne, konstruita kontraŭ la norda ekstremaĵo de la domo). Ties muroj estis el puraj ŝtonoj, sed plejparte ili estis kovritaj de pendantaj verdaj matoj kaj flavaj kurtenoj. La planko estis pavimita, kaj kovrita de disŝutitaj freŝaj verdaj junkoj. Troviĝis kvar profundaj matracoj, ĉiu kun amaso da blankaj lankovriloj, sternitaj sur la planko apud unu muro. Apud la kontraŭa muro estis longa benko, ŝarĝita de larĝaj fajencaj pelvoj, kaj apude staris brunaj kruĉoj plenaj de akvo, iuj malvarmaj, iuj vaporante varmegaj. Apud ĉiu lito estis prete metitaj molaj verdaj pantofloj.

Post nelonge, lavitaj kaj refreŝigitaj, la hobitoj estis sidantaj ĉe la tablo, po du ambaŭflanke, dum ĉe la du finoj sidis Orbero kaj la Mastro. La manĝo estis longa kaj gaja. Kvankam la hobitoj manĝis tiel, kiel kapablas nur malsategaj hobitoj, manko ne okazis. La trinkaĵo en iliaj pelvetoj ŝajnis esti klara frideta akvo, tamen ĝi efikis al iliaj koroj kvazaŭ vino kaj liberigis iliajn voĉojn. La gastoj subite konstatis, ke ili gaje kantas, kvazaŭ tio estus pli facila kaj pli natura ol parolado.

Finfine Tom kaj Orbero stariĝis kaj rapide forigis la manĝilaron kaj restaĵojn. Al la gastoj estis ordonite, ke ili sidu trankvile, kaj ili estis sidigitaj sur seĝoj kun po tabureto por la lacaj piedoj. Sur la larĝa kameno antaŭ ili brulis fajro, kaj ĝi brulis kun dolĉa odoro, kvazaŭ ĝi estus el pomarbaĵo. Kiam ĉio estis ordigita, oni estingis ĉiujn lumojn en la ĉambro escepte de unu lampo kaj po du kandeloj ambaŭfine de la kamenbreto. Tiam venis Orbero kaj staris antaŭ ili, tenante kandelon, kaj ŝi deziris al ĉiu el ili bonan nokton kaj profundan dormon.

— Havu nur trankvilon, — ŝi diris, — ĝis la mateno! Atentu neniun noktan bruon! ĉar nenio ĉi tie pasas pordon kaj fenestron krom lunlumo kaj stellumo kaj la vento de l' montetopintoj. Bonan nokton! — Ŝi foriris el la ĉambro kun glimo kaj susuro. La sono de ŝiaj paŝoj similis rivereton forfluantan milde malsupren laŭ deklivo trans friskajn ŝtonojn en la nokta kvieto.

Tom daŭre sidadis apud ili silente, dum ĉiu el ili provis ekhavi kuraĝon por starigi unu el la multaj demandoj, kiujn li intencis starigi dum la

vespermanĝo. Dormo komencis premi iliajn palpebrojn. Finfine Frodo ekparolis:

— Ĉu vi aŭdis mian vokadon, Mastro, aŭ nur la hazardo alportis vin tiumomente?

Tom ekmovis sin kvazaŭ viro skue vekita el agrabla sonĝo.

— Ha, kio? — li diris. — ĉu mi aŭdis vian vokadon? Ne, tion mi ne aŭdis: mi tro okupiĝis pri kantado. Nur la hazardo alportis min tiam, se vi nomas tion hazardo. Mi tion neniel planis, kvankam mi vin atendis. Mi sciiĝis pri vi kaj konstatis, ke vi vagadas. Mi divenis, ke vi alvenos postnelonge al la akvo: ĉiuj vojetoj kondukas tien al Videvindlo. Olda Griza Salikulo, jen potenca kantulo, kaj nur malfacile la etuloj eskapas liajn ruzajn labirintojn. Sed Tom havis komision tie, kiun li ne aŭdacis malhelpi. — La kapo de Tom kliniĝis kvazaŭ dormo denove inundus lin, sed li daŭrigis per mallaŭta kantvoĉo:

Mi havis komision tie, la nimfeojn pluki
foliojn verdajn kaj liliojn por la bela damo,
lastajn antaŭ jarofino por dumvintre teni,
por ĉe l' piedoj belaj flori ĝis la neĝ' degelos.
ĉiujare somerfine iras mi por serĉi
ĉe larĝa lago klarprofunda laŭ la Videvindlo;
tie la unuaj floroj, tie lastfloradas.
Tiulage antaŭlonge mi Riverfilinon,
Orberon junan, belan trovis inter la karikoj.
Dolĉis ŝia kanto tiam, kaj la koro batis!

Li malfermis siajn okulojn kaj rigardis al ili kun subita ekbrilo da bluo.

Kaj tio por vi falis bone — ĉar mi ne plu vagos
ree profundiĝe laŭ la akvo de l' arbaro,
dum la jaro oldas. Ankaŭ mi ne pasos preter
la dom' de Salikulo ĝis revenos la printempo,
ĝis printempo gaja, kiam la Riverfilino
dancos laŭ la pado por sin bani en la akvo.

Denove li silentiĝis; sed Frodo ne povis ne starigi ankoraŭ unu demandon: tiun, kies respondon li plej deziris aŭdi.

— Rakontu al ni, Mastro, — li diris, — pri la Salikulo. Kio ĝi estas? Pri ĝi mi neniam antaŭe aŭdis.

— Ne, tion ne! — diris Gaja kaj Grinĉjo kune, subite rektigante sin. — Ne nun! Ne ĝis la mateno!

— Vi pravas! — diris la maljunulo. — Nun horo estas por ripozi.

Kelkajn aferojn estas malbone aŭdi, kiam la mondo estas en ombro. Dormu ĝis la matenlumo! Kapkusenon prenu! Noktan bruon malatentu! Pro Salikul' ne tremu! — dirinte tion li dekroĉis la lampon kaj ĝin blovestingis, kaj tenante po kandelon en ĉiu mano li gvidis ilin el la ĉambro.

Iliaj matracoj kaj kapkusenoj estis lanuge molaj, kaj la kovriloj estis el blanka lano. Apenaŭ ili kuŝigis sin sur la profundajn litojn kaj tiris sur sin la malpezajn kovrilojn, jam ili ekdormis.

En la profunda nokto, Frodo kuŝis en sonĝo senluma. Poste li vidis leviĝi junan lunon, sub ties maldensa lumo baŭmis antaŭ li nigra rokrnuro, trabreĉita de malhela arkaĵo simila al pordego. Al Frodo ŝajnis, ke li estas levita, kaj transpasante li vidis, ke la rokmuro estas cirklo da montetoj, interne de kiu troviĝas ebenaĵo, kaj meze de tiu ebenaĵo staris pinaklego el ŝtono, kiel larĝa turo ne permane farita. Sur ties supro staris homfiguro. La luno leviĝanta ŝajnis ŝvebi momente super ties kapo kaj ekbrilis en ties blankaj haroj dum la vento ĝin trablovis. Supren el la malhela suba ebenaĵo aŭdiĝis kriado de voĉoj minacaj, kaj la ululado de multaj lupoj. Subite ombro, kiel la formo de flugilegoj, transpasis la lunon. La homfiguro altigis la brakojn kaj lumo ekbrilis el la bastono, kiun li tenis. Potenca aglo subenflugis kaj lin forportis. La voĉoj lamentis kaj la lupoj bojaĉis. Aŭdiĝis bruo simila al forte blovanta vento, kaj sur ĝi portiĝis sono de hufoj, galopantaj, galopantaj, galopantaj el la oriento. "Nigraj Rajdantoj!" — pensis Frodo vekiĝante, dum la sono de la hufoj plu eĥis en lia menso. Li scivolis, ĉu li iam denove posedos sufiĉan kuraĝon por lasi la sekurecon de tiuj ĉi ŝtonmuroj. Li kuŝis senmova, plu aŭskultante; sed jam ĉio silentis, kaj fine li sin turnis kaj reekdormis, aŭ envagis iun alian nememorotan sonĝon.

Ĉe lia flanko kuŝis Grinĉjo agrable sonĝante, sed ekŝanĝiĝis liaj sonĝoj kaj li turniĝis kaj ĝemis. Subite li vekiĝis, aŭ tion li supozis, kaj tamen plu aŭdiĝis en la mallumo la sono, kiu perturbis lian sonĝon: *frip-frap, grinc'*: la sono similis branĉojn malkvietajn pro la vento, branĉet-fingrojn skrapantajn muron kaj fenestron: *grinc', grinc', grinc'*. Li scivolis, eu salikoj proksimas al la domo, kaj poste li subite spertis teruran senton, ke li tute ne estas en ordinara domo, sed interne de l' saliko, denove aŭskultante tiun timigan sekan grincan voĉon denove lin primokantan. Li sidiĝis kaj sentis cedon de l' molaj kapkusenoj sub liaj manoj, kaj kuŝiĝis denove, malŝarĝite. Li ŝajne aŭdis eĥon de vortoj en siaj oreloj: "Timu nenion! Havu trankvilon ĝis la mateno! Atentu neniun noktan bruon!" Poste li reendormiĝis.

Estis sono de akvo, kiun Gaja aŭdis falanta en lian trankvilan dormon; akvo subenfluanta malsovaĝe kaj poste disvastiĝanta, nerezisteble disvastiĝanta ĉirkaŭ la tutan domon je malhela senborda lageto. Ĝi gargaris sub la muroj kaj leviĝis lante sed konstante. "Mi dronos! — li pensis. — Ĝi

trovos enirvojon, kaj poste mi dronos”. Al li sentiĝis, ke li kuŝas en mola ŝlima marĉo, kaj saltleviĝe li metis piedon sur angulon de malvarma malmola pavimero. Tiam li memoris, kie li troviĝas, kaj rekuŝiĝis. Li ŝajne aŭdis aŭ memoris aŭdi: “Nenio pasas pordon aŭ fenestron krom lunlumo kaj stellumo kaj la vento de l’ montetopintoj”. Spireto da dolĉa aero movis la kurtenon. Li profunde enspiris kaj reendormiĝis.

Laŭ sia memoro, Sam tradormis la nokton profunde kontenta, se ŝtipoj estas kontentaj.

Ili vekiĝis, ĉiuj kvar samtempe, en la matena lumo. Tom ĉirkaŭmoviĝis en la ĉambro fajfante kiel sturno. Kiam li aŭdis, ke ili ekmovas sin, li kunfrapis la manojn, kaj kriis: — Hej! Venu gaja dol! dero-dol! Bravuloj miaj! — Li transtiris la kurtenojn flavajn, kaj la hobitoj konstatis, ke tiuj estis kovrintaj la fenestrojn, ambaŭfine de la ĉambro, unu frontanta orienten kaj la alia okcidenten.

Ili saltleviĝis refreŝigite. Frodo kuris ĝis la orienta fenestro kaj trovis, ke li rigardas en legomĝardenon grizan pro roso. Li duonatendis vidi herbgrundon apud la muroj, herbgrundon tute makulitan de hufspuroj. Fakte lian vidkampon ekranis alta vico de fazeolujoj sur stangoj; super ili kaj malproksime baŭmis antaŭ la sunleviĝo la griza montosupro. Estis mateno pala: oriente, malantaŭ longaj nuboj similaj al strioj de malpurigita lano rande ruĝmakulitaj, kuŝis glimantaj flavprofundaĵoj. La ĉielo anoncis pluvon venontan; sed la lumo rapide larĝiĝis, kaj la ruĝaj floroj sur la fazeolujoj komencis ardi antaŭ la malsekaj verdaj folioj.

Grinĉjo trarigardis la okcidentan fenestron, suben en lageton de nebulo. La Arbaro estis kaŝita sub nebulego. Tio similis rigardi de supre al dekliva nubtegmento. Vidiĝis faldaĵo aŭ kavo, kie la nebulo dissplitiĝis je multaj plumaroj kaj ŝaŭmejoj; nome, la valo de Videvindlo. La rivereto fluis maldekstre kaj malaperis en la blankajn ombrojn. Proksime estis florĝardeno kaj tondita dornbarilo arĝentretita, kaj poste griza razita razeno pala pro roseroj. Neniu saliko estis videbla.

— Bonan matenon, amikoj gajaj! — kriis Tom, larĝe malfermante la orientan fenestron. Enfluis malvarmeta aero; ĝi havis odoron pluvecan. — Suno ne multe montros sian vizaĝon hodiaŭ, al mi ŝajnas. Mi vaste promenadis, saltante sur la montetosuproj, depost la komenciĝo de l’ griza aŭroro, nazante venton kaj veteron, kun malseka herbo subpiede, malseka ĉielo supre. Mi vekis Orberon per subfenestra kantado, sed nenio vekas hobitojn frumatene. Dum la nokto etuloj vekiĝas en la mallumo, kaj dormas post alveno de la lumo! Ring a ding diljo! Jam vekiĝu, amikoj gajaj! Forgesu bruojn de l’ nokto! Ring a ding diljo del, bravuloj! Se vi venos baldaŭ vi trovos sur la tablo matenmanĝon. Se vi venos malfrue vi ricevos

herbon kaj pluvakvon!

Sendiskute — kvankam la minaco de Tom ne ŝajnis tre serioza — la hobitoj venis baldaŭ, kaj forlasis la tablon malfrue, kaj nur kiam ĝi ekaspektis iom senŝarĝa. Ĉeestis nek Tom nek Orbero. Tom aŭdiĝis ie en la domo, klakbruante en la kuirejo, kaj supren-suben laŭ la ŝtuparo, kaj kantante ie-tie ekstere. La ĉambro frontis okcidenten trans la nebuletozan valon, kaj la fenestro estis malfermita. Akvo gutis suben de la pajla tegmentorando supre. Antaŭ ol ili frumanĝis, la nuboj jam kuniĝis je seninterrompa ĉielkovrilo, kaj rekta griza pluvo mole kaj konstante faladis. Malantaŭ ĝia profunda kurteno la Arbaro estis komplete vualita.

Dum ili trarigardis la fenestron, venis desupre, milde kvazaŭ ĝi defluis el la ĉielo laŭ la pluvo, la klara voĉo de Orbero kantanta super iliaj kapoj. Malmultajn vortojn ili kaptis, sed ŝajnis al ili klare, ke tiu kanto estas pluvkanto, dolĉa kiel pluvetoj sur sekajn montetojn, kiu rakontas historion pri rivero ekde la fonto en la montaro ĝis la Maro en la suba malproksimo. La hobitoj aŭskultis ĝojplene, kaj Frodo feliĉis en la koro, kaj benis la afablan veteron, ĉar ĝi malhelpis ilian foriron. Penso pri la foriro pezis sur lin ekde la vekiĝa momento, sed li jam supozis, ke ili nenien plu iros dum tiu tago.

La supra vento ekkonstantis de Okcidento, kaj pli profundaj kaj pli malsekaj nuboj alruliĝis por verŝi sian pluvoŝarĝon sur la nudajn vertojn de la Montetoj. Nenio videblis ĉirkaŭ la domo krom falanta akvo. Frodo staris apud la malfermita pordo kaj vidis la blankan kalkecan padon iĝi laktorivereto kaj foriri bobelante suben en la valon. Venis Tom Bombadiljo trote ĉirkaŭ la domanĝulon, flirtigante siajn brakojn kvazaŭ li forpuŝus la pluvon — kaj efektive kiam li transsaltis la sojlon li ŝajnis tute seka, krom la botoj. Tiujn li demetis kaj lokigis en la kamenangulo. Poste li sidiĝis sur la plej granda seĝo kaj vokis, ke la hobitoj kuniĝu ĉirkaŭ li.

— Hodiaŭ estas la lavtago de Orbero, — li diris, — kaj ŝia aŭtuna dompurigado. Tro malseke por la hobitaro — ili ripozu dum tio eblas! Jen taŭga tago por longaj historioj, por demandoj kaj respondoj, do Tom komencos la paroladon.

Li poste rakontis al ili multajn mirindajn historiojn, jen duone kvazaŭ li parolus al si mem, jen subite rigardante ilin per la helbluaj okuloj sub la profundaj brovoj. Ofte lia voĉo iĝis kantanta, kaj li forlasis la seĝon kaj ĉirkaŭdancadis. Li rakontis pri abeloj kaj floroj, la moroj de arboj, kaj la strangaj kreaĵoj en la Arbaro, pri misaj aferoj kaj bonaj aferoj, aĵoj amikecaj kaj aĵoj neamikecaj, kruelaĵoj kaj bonkoraĵoj, kaj sekretoj kaŝitaj sub rubusoj.

Aŭskultante, ili komencis kompreni la vivojn de la Arbaro, krom si

mem, efektive senti sin fremduloj tie, kie ĉio alia sentis sin hejme. Enkaj eliranta senĉese lian paroladon estis Maljunulo Saliko, kaj Frodo eksciis jam sufiĉe por lin kontentigi, ja pli ol sufiĉe, ĉar tiu konaro ne estis komforta. La vortoj de Tom nudigis la korojn de arboj kaj iliajn pensojn, kiuj estis ofte malhelaj kaj strangaj, kaj plenigitaj de malamo al tio, kio iras libere sur la tero, maĉante, mordante, rompante, hakante, bruligante: detruantoj kaj uzurpantoj. Ne senkaŭze ĝi nomiĝis la Malnova Arbaro, ĉar ĝi efektive estis antikva postvivanto de vastaj forgesitaj arbaroj; kaj en ĝi daŭre vivadis, oldiĝante ne pli rapide ol la montetoj, la patroj de la patroj de arboj, memorante epokojn, kiam ili estis regantoj. La sennombraj jaroj plenigis ilin je fiero, enradika saĝo kaj malico. Sed neniu el ili pli timindis ol la Granda Saliko: ĝia koro estis putra, sed ĝia forto estis verda, kaj ĝi estis ruza, kaj mastris ventojn, kaj ĝiaj kanto kaj pensado trakuris la arbarojn ambaŭflanke de l' rivero. Ĝia griza soifa spirito suĉis potencon el la tero kaj disvastiĝis kvazaŭ fajnaj radikfadenoj en la tero, kaj nevideblaj branĉetfingroj en la aero, ĝis sub sia regado ĝi havis preskaŭ ĉiujn arbojn de l' Arbaro ekde la Heĝo ĝis la Montetoj.

Subite la parolado de Tom forlasis la arbarojn kaj iris saltante supren laŭ la juna rivereto, trans bobelantajn akvofalojn, trans ŝtonetojn kaj trivitajn rokojn, kaj inter floretojn en densa herbaro kaj malsekaj fendetoj, vagante finfine sur la Montetosuprojn. Ili aŭdis pri la Grandaj Dolmenoj, kaj la verdaj tumuloj, kaj la ŝtonringoj sur la montetoj kaj en kavaĵetoj inter la montetoj. Ŝafoj beadis grege. Leviĝis verdaj muroj kaj blankaj muroj. Sur la altaĵoj troviĝis fortikaĵoj. Reĝoj de reĝlandetoj interbatalis, kaj la juna suno brilis fajrece sur la ruĝa metalo de iliaj novaj kaj avidaj glavoj. Okazis venkoj kaj malvenkoj; falis turoj, bruligitaj estis fortikaĵoj, kaj flamoj leviĝis en la ĉielon. Oro estis amasigita sur la mortbrankardojn de reĝoj kaj reĝinoj, kaj teramasoj kovris ilin, kaj la ŝtonaj pordoj estis fermitaj, kaj la herbo surkreskis ĉion. Ŝafoj dum kelka tempo denove vagadis mordante la herbon, sed baldaŭ la montetoj estis ree malplenaj. Ombroj eliĝis el malproksimaj lokoj malhelaj, kaj la ostoj estis movitaj en la teramasetoj. Dolmenuloj promenis en la kavaĵoj laŭ tintado de ringoj sur malvarmaj fingroj kaj oraj ĉenoj pro la vento. Ŝtonaj ringoj rikanis el la tero, kvazaŭ rompitaj dentoj, en la lunlumo.

La hobitoj tremegis. Eĉ en la Provinco estis aŭdita onidiro pri la dolmenuloj de la Dolmenejoj trans la Arbaro. Sed tio ne estis rakonto, kiun la hobitoj ŝatis aŭskulti, eĉ apud komforta kameno malproksime. Tiuj kvar jam subite rememoris tion, kion la ĝojo en tiu ĉi domo forpelis el iliaj mensoj: la domo de Tom Bombadiljo kaŭris sub la ŝultro mem de tiuj timataj montetoj. Ili perdis la fadenon de lia rakonto kaj moviĝetis

maltrankvile, flanken rigardante unu al alia.

Kiam ili denove rimarkis liajn vortojn, ili konstatis, ke li jam forvagis en strangajn regionojn preter ilia memoro kaj preter ilia maldorma pensado, en epokon, kiam la mondo estis pli vasta, kaj la maroj fluis rekte al la okcidenta bordo; kaj plu malantaŭen iris Tom kantante en antikvan stellumon, kiam nur la prapatroj de la elfoj estis maldormaj. Poste li subite silentis, kaj ili vidis, ke lia kapo kliniĝis kvazaŭ li ekdormus. La hobitoj daŭre sidis antaŭ li, sorĉite; kaj ŝajnis kvazaŭ, pro la sorĉo en liaj vortoj, la vento forirus, kaj la nuboj sekiĝus, kaj la tago estis forigita, kaj mallumo venis de oriento kaj okcidento, kaj la tutan ĉielon plenigis lumo de blankaj steloj.

Ĉu pasis la mateno kaj la vespero de unu tago aŭ de multaj tagoj Frodo ne povis scii. Li sentis nek malsaton nek laciĝon, nur pleniĝon je miro. La steloj trabrilis la fenestron, kaj ŝajnis ĉirkaŭi la silento de la ĉielo. Li ekparolis finfine pro sia miro kaj subita timo pro tiu silento:

— Kiu vi estas, Mastro? — li demandis.

— Ha, kio? — diris Tom, rektiĝante, kaj liaj okuloj ekbriletis en la malhelo. — Ĉu vi ankoraŭ ne scias mian nomon? Jen la sola respondo. Diru al mi, kiu estas vi, sola, vi mern kaj sennoma? Sed vi estas juna kaj mi maljunas. La plej maljuna, jen kia mi estas. Atentu miajn vortojn, amikoj: Tom estis ĉi tie antaŭ la rivero kaj la arboj; Tom memoras la unuan pluveron kaj la unuan glanon. Li faris padojn antaŭ la granduloj, kaj vidis la alvenon de la malgranduloj. Li estis ĉi tie antaŭ la reĝoj kaj la tomboj kaj la dolmenuloj. Kiam la elfoj foriris okcidenten, Tom jam estis ĉi tie, antaŭ ol la riveroj estis kurbigitaj. Li konis la mallumon sub la steloj kiam tio estis netimiga — antaŭ ol venis de la Ekstero la Malluma Mastro.

Ombro ŝajnis preterpasi la fenestrojn, kaj la hobitoj ekrigardis haste tra la vitroj. Kiam ili denove sin alturnis, Orbero staris ĉe la pordo malantaŭe, kadrita per lumo. Ŝi tenis kandelon, ŝirmante ties flamon kontraŭ la trablovo per sia mano, kaj la lumo trafluis ĝin, kiel sunlumo tra blanka konko.

— Ĉesis pluvi, — ŝi diris, — kaj novaj akvoj fluas suben, sub la steloj. Nun ni ridu kaj ĝoju!

— Kaj ni havu manĝaĵon kaj trinkaĵon! — kriis Tom. — Longaj rakontoj estas soifigaj. Kaj longa aŭskultado estas tasko malsatiga, matenon, tagmezon, kaj vesperon! — Tion dirinte li salte elseĝiĝis, kaj saltinte prenis kandelon desur la kamenbreto kaj fajrigis ĝin per la flamo tenata de Orbero; poste li ĉirkaŭdancis la tablon. Subite li hopis tra la pordo kaj malaperis.

Rapide li revenis, portante grandan ŝarĝitan pleton. Poste Tom kaj Orbero surtabligis ĉion, kaj la hobitoj sidis duone mirante kaj duone ridante: tiel bela estis la gracio de Orbero kaj tiel gaja kaj stranga la saltado de Tom.

Tamen iel ili ŝajnis plekti unuopan dancon, neniu malhelpante la alian, en kaj el la ĉambro, kaj ĉirkaŭ la tablon, kaj rapidege manĝaĵoj, vazoj kaj lumoj estis ordigitaj. Sur la tablo flamis kandeloj, blankaj kaj flavaj. Tom riverencis al siaj gastoj.

— Vespermanĝo estas preta, — diris Orbero; kaj nun la hobitoj vidis, ke ŝi estas vestita tute per arĝento kun blanka zono, kaj ŝiaj ŝuoj similis fiŝskvamaron. Sed Tom estis tute, en pura bluo, bluo kiel de pluvlavitaj miozotoj, kaj li portis verdajn ŝtrumpojn.

Tiu ĉi vespermanĝo estis eĉ pli bona ol la antaŭa. La hobitoj sorĉite de la vortoj de Tom eble maltrafis unu manĝon aŭ multajn, sed kiam la manĝaĵoj estis antaŭ ili, jam ŝajnis minimume semajno depost la lasta manĝo. Ili ne kantis nek multe parolis dum kelka tempo, kaj zorge atentis sian taskon. Sed post kelka tempo iliaj koroj kaj animoj denove leviĝis, kaj iliaj voĉoj sonoris gaje kaj ride.

Post la manĝo, Orbero kantis por ili multajn kantojn, kantojn, kiuj komenciĝis gaje sur la montetoj kaj subenfalis softe en silenton, kaj dum la silentoj ili mense vidis lagetojn kaj akvojn pli larĝajn ol ili antaŭe konis, kaj enrigardante ilin ili vidis la ĉielon sube kaj la stelojn kiel juveloj en la profundaĵoj. Poste ŝi denove deziris al ĉiu el ili bonan nokton kaj lasis ilin apud la kameno. Sed Tom jam ŝajnis plene maldorma kaj multe pridemandis ilin.

Aperis, ke li jam sciis multon pri ili kaj iliaj familioj, kaj fakte sciis multon pri la tuta historio kaj okazaĵoj de la Provinco ekde tagoj apenaŭ memorataj inter la hobitoj mem. Tio ne plu surprizis ilin; sed li tute ne kaŝis, ke li ŝuldas sian lastatempan informiĝon grandparte al terkulturisto Larvo, kiun li ŝajne taksis persono pli grava ol ili antaŭsupozis.

— Troviĝas tero sub liaj maljunaj piedoj, kaj argilo sur liaj fingroj, saĝo en liaj ostoj, kaj ambaŭ liaj okuloj estas malfermitaj, — diris Tom. Estis klare ankaŭ, ke Tom havis kontaktojn kun la elfoj, kaj ŝajnis, ke iel lin atingis sciigo de Gildoro pri la forfuĝo de Frodo.

Efektive, tiom sciis Tom, kaj tiel ruza estis lia demandado, ke Frodo trovis sin rakontanta al li pli multon pri Bilbo kaj liaj propraj timoj kaj esperoj, ol li pli frue rakontis eĉ al Gandalfo. Tom pendoligis sian kapon, kaj en liaj okuloj aperis ekbrileto, kiam li aŭdis pri la Rajdantoj.

— Montru al mi la valoran Ringon! — li diris subite meze de la rakonto: kaj Frodo, je propra ekmiro, eltiris la ĉenon el sia poŝo, kaj malliginte la Ringon tuj transdonis ĝin al Tom.

Ĝi ŝajnis pligrandiĝi dum ĝi kuŝis momente sur lia granda brunhaŭta manplato. Tiam subite li almetis ĝin al sia okulo kaj ridis. Dum sekundo vidiĝis al la hobitoj, tiel komike kiel timige, lia helblua okulo glimanta tra

cirklo da oro. Poste Tom metis la Ringon sur la finon de sia etfingro kaj etendis ĝin al la kandellumo. Momente la hobitoj rimarkis nenion strangan pri tio. Poste ili spirspasmis. Vidiĝis neniu signo, ke Tom malaperos!

Tom denove ridis, kaj li ĵetis la Ringon en la aeron — kaj ĝi malaperis en ekbrilo. Frodo elpuŝis krion — kaj Tom klinis sin antaŭen kaj ridetante redonis ĝin al li.

Frodo rigardis ĝin de proksime, kaj iom suspekteme (kiel iu, kiu pruntedonis juveleton al ĵonglisto). Ĝi estis la sama Ringo, aspektis same kaj pezis same: ĉar tiu Ringo ĉiam ŝajnis al Frodo iom strange tropeza sur la mano. Sed io devigis lin certiĝi. Li eble iom indigniĝis, ke Tom traktis tiel facilanime tion, kion eĉ Gandalfo supozis tiel danĝere grava. Li atendis eblecon, kiam la parolado rekomenciĝis, kaj Tom rakontis absurdan historion pri meloj kaj ties strangaj moroj — tiam li surglitigis la Ringon.

Gaja sin turnis al li por diri ion, surpriziĝis kaj haltigis ekkrion. Frodo estis ĝojigita (certagrade): ĝi vere estis lia propra Ringo, ĉar Gaja rigardis nekredeme al lia seĝo, kaj evidente ne povis vidi lin. Li stariĝis kaj kviete forŝteliĝis de la kameno al la dompordo.

— Ej-la! — kriis Tom, ekrigardante al li kun tre vidkapabla esprimo en siaj brilaj okuloj. — Hej! Venu, Frodo, vi! Kien vi foriras? Maljuna Tom Bombadiljo ankoraŭ ne tiom blindas. Formetu vian oran ringon! Via mano pli belas sen ĝi. Revenu! Lasu vian ludon kaj sidiĝu apud min! Ni devas paroli ankoraŭ iom, kaj pensi pri la mateno. Tom devas instrui al vi la ĝustan vojon, kaj malhelpi erarvagon de viaj piedoj.

Frodo ridis, klopodante senti kontentiĝon, kaj formetinte la Ringon li venis kaj residiĝis. Tom nun diris al ili, ke laŭ lia opinio la suno brilos morgaŭ, kaj ĝi estos feliĉa mateno, kaj ekiro estos esperiga. Sed estos bone, ke ili ekiru frue, ĉar la vetero en tiu regiono estis afero, pri kiu eĉ Tom ne povis esti certa longtempe, kaj ĝi foje ŝanĝiĝas pli rapide ol li kapablis ŝanĝi sian jakon.

— Mi estas nenia vetermajstro, — li diris, — samkiel ĉio, kio iras dupiede.

Laŭ lia konsilo ili decidis celi preskaŭ rekte norden de lia domo, preter la okcidenta kaj malsupera deklivo de la Montetaro: laŭ tiu vojo ili povis esperi, ke ili trafos la Orientan Vojon per unutaga irado, kaj evitos la Dolmenojn. Li diris, ke ili ne timu — sed okupiĝu nur pri propraj aferoj.

— Iru nur laŭ la verda herbo. Ne rilatu kun malnovaj ŝtonoj, malvarmaj dolmenuloj, kaj ne gvatu en iliajn domojn, krom se vi estas personoj kun koroj neniam hezitemaj!

Pli ol unufoje li diris tion, kaj konsilis, ke ili preterpasu dolmenojn laŭ la okcidenta flanko, se hazarde ili vage proksimiĝus al unu tia. Poste li instruis

al ili rimaĵon kantotan se ili malbonŝance trafus en danĝeron aŭ malfacilaĵon dum la venonta tago:

Ho! Torn Bombadil', Tom Bombadiljo!
Je akvo, arb', monteto, kariko kaj saliko,
je fajro, sun' kaj hmo, aŭdu! ni admonas!
Venu, Tom Bombadiljo, ĉar ni vin bezonas!

Kiam ili kunkantis tion laŭ lia ekzemplo, li frapetis ĉiun ŝultre kun rido kaj preninte kandelojn rekondukis ilin al ilia dormoĉambro.

8

Nebulo sur la Dolmenejo

Tiunokte ili aŭdis neniujn sonojn. Sed sonĝe aŭ malsonĝe — li ne povis distingi — Frodo aŭdis dolĉan kantadon, kiu trakuris lian menson: kanton, kiu ŝajnis veni kiel pala lumo malantaŭ griza pluvkurteno, kaj plifortiĝante vitrigi kaj arĝentigi la vualon, ĝis fine ĝi forruliĝis, kaj dista verda tereno malfermiĝis antaŭ li sub rapida sunleviĝo.

La vidaĵo fandiĝis al vekiĝo; kaj Tom jam fajfis kiel arbopleno da birdoj; kaj la suno jam avancis laŭ la dekliva montetoflanko kaj tra la malfermita fenestro. Ekstere ĉio estis verda kaj pale ora.

Post matenmanĝo, kiun denove ili manĝis solaj, ili pretiĝis por adiaŭi, preskaŭ tiel pezkoraj kiel eblis en tia mateno: malvarmeta, hela, kaj pura sub lavita aŭtuna ĉielo el maldensa bluo. La aero alvenis freŝe el la nord-okcidento. Iliaj kvietaj poneoj estis preskaŭ ludemaj, snufante kaj sentrankvile moviĝante. Tom elvenis el la domo, flirtigis sian ĉapelon kaj dancis ĉe la sojlo, instrukciante, ke la hobitoj surseliĝu, ekiru kaj vojaĝu per taŭga rapideco.

Ili forrajdis laŭ vojeto, kiu serpentumis for de la doma malantaŭo, kaj iris deklive supren al la norda finaĵo de la montetoverto, per kiu ĝi estis ŝirmata. Ili ĵus elseliĝis por konduki siajn poneojn supren laŭ la lasta apika deklivo, kiam subite Frodo haltis.

— Orbero! — li kriis. — Mia bela damo, tute vestita per arĝenta verdo! Ni eĉ ne adiaŭis ŝin, nek vidis ŝin depost la vespero! — Li estis tiel malĝojigita, ke li retroturniĝis; sed tiumomente ondiĝetis suben al ili klara alvoko. Tie sur la montetoverto ŝi staris gestante al ili: ŝiaj haroj disbloviĝis malstrikte, kaj trafite de la sunlumo ili ekbrilis kaj glimetis, Lumo simila al akvoglimo sur roskovrita herbo elflagris el sub ŝiaj piedoj dum ŝi dancis.

Ili rapidis supren laŭ la lasta deklivo, kaj ekstaris antaŭ ŝi senspire. Ili riverencis, sed per gesto de la brako ŝi proponis, ke ili rigardu ĉirkaŭen; kaj ili rigardis desur la verto al la vastaĵoj sub la mateno. Ĉio nun estis tiel klara kaj distvidebla, kiel ĝi estis vualita kaj nebuleta kiam ili staris sur la monteto en la Arbaro, kiu nun vidiĝis leviĝanta pala kaj verda el la malhelaj arboj okcidente. Tiudirekte la tereno leviĝis laŭ arbokovritaj firstoj, verdaj, flavaj, rufaj sub la suno, post kiu kuŝis kaŝite la valo de Brandovino. Sube, trans la linio de Videvindlo, vidiĝis malproksima ekbrilo simila al pala

vitro, kie la rivero Brandovino kurbegiĝis sur la ebenaĵo kaj forfluadis ekster la scion de la hobitoj. Norde post la malmultiĝantaj montetoj la tereno foretendiĝis laŭ ebenejoj kaj ŝveliĝoj grizaj, verdaj kaj pale terkoloraj, ĝis ĝi forfadis al senkontura kaj ombreca malproksimo. Oriente leviĝis la tumuloj, firsto post firsto en la matenon, kaj malaperis el la vido al konjektejo: tio estis ne pli ol konjektaĵo de bluo kaj distega blanka ekglimo miksiĝantaj kun la orlo de la ĉielo, sed ĝi alparolis ilin, el memoroj kaj malnovaj rakontoj, pri la altaj kaj malproksimaj montoj.

Ili profunde enspiris la aeron, kaj sentis, ke salteto kaj pluraj bravaj paŝoj alportus ilin kien ajn ili dezirus. Ŝajnis malkuraĝe, flankeniri trotete laŭ la taŭzitaj randoj de la montetaro direkte al la Vojo, kiam ili devus salti, viglaj kiel Tom, laŭ ŝtonoj de la montetoj rekte al la Montegaro.

Orbero alparolis ilin kaj revokis iliajn okulojn kaj pensojn.

— Rapidu jam, bonaj gastoj! Kaj obstinu laŭ via celo! Norden kun la vento maldekstre kaj benon al viaj paŝoj! Rapidu dum la Suno brilas! — Kaj al Frodo ŝi diris: — Adiaŭ, elf-amiko, tio estis gaja renkontiĝo!

Sed por respondi Frodo trovis neniujn vortojn. Li profunde riverencis, sidiĝis sur sian ponon kaj sekvate de la amikoj trotetis malrapide suben laŭ la deklivo malantaŭ la monteto. La domo de Tom Bombadiljo, la valo, kaj la Arbaro ne plu vidiĝis. La aero plivarmiĝis inter la verdaj muroj de monteto kaj monteto, kaj la odoro de la herbotero leviĝis forta kaj dolĉa dum ili spiris. Returnante sin, kiam ili atingis la fundon de la verda kavaĵo, ili vidis Orberon, jam etan kaj sveltan kiel sunbanita floro kontraŭ la ĉielo: ŝi staris ankoraŭ rigardante ilin, kaj ŝiaj manoj estis etenditaj al ili. Dum ili rigardis ŝi elpuŝis klaran krion, kaj levante sian manon ŝi turniĝis kaj malaperis post la monteton.

Ilia vojo serpentumis funde de valo, kaj ĉirkaŭ la verda piedo de apika monteto en alian pli profundan kaj pli larĝan valon, kaj poste trans la ŝultron de pliaj montetoj, kaj suben laŭ iliaj longaj membroj, kaj denove supren laŭ iliaj glataj flankoj, supren sur novajn vertojn kaj suben en novajn valojn. Troviĝis neniu arbo nek iu ajn videbla akvo: nur herbo kaj mallonga risorta gazonaĵo, silenta escepte de la fiustro de l’ aero trans la randojn de la tereno kaj altaj solecaj krioj de strangaj birdoj. Dum ili vojaĝis la suno altiĝis kaj varmiĝis. Ĉiufoje kiam ili supreniris firston la venteto ŝajnis malfortiĝinta. Kiam ili ekvidis la terenon okcidente, la malproksima Arbaro ŝajnis fumi, kvazaŭ la falinta pluvo vaporiĝis denove supren el folioj kaj radikoj kaj ŝimo. Ombro jam ĉirkaŭkuŝis la randon de la videbleco, malhela nebuleto, super kiu la supra ĉielo similis bluan ĉapon, varman kaj pezan.

Proksimume tagmeze ili alvenis monteton, kies supraĵo estis larĝa kaj plata, kiel malprofunda telero kun verda ondforma rando. En ĝi neniu aero

moviĝis, kaj la ĉielo ŝajnis proksima al iliaj kapoj. Ili alrajdis kaj rigardis norden. Tiam iliaj koroj inspiriĝis, ĉar ŝajnis evidente, ke ili jam pli progresis, ol ili atendis. Vere la distancoj jam fariĝis malprecizaj kaj trompemaj, sed estis sendube, ke la montetaro komencas finiĝi. Longa valo kuŝis sube serpentumante norden, ĝis ĝi atingis trairejon inter du apikaj deklivoj. Poste, ŝajnis, ke ne plu estas montetoj. Rekte norde ili svage ekvidis longan malhelan strion.

— Tio estas vico de arboj, — diris Gaja, — kaj tio nepre signas la Vojon. Laŭlonge de ĝi dum multaj mejloj oriente de la Ponto kreskas arboj. Iuj diras, ke ili estis plantitaj en la malnova tempo.

— Bonege! — diris Frodo. — Se ni progresos tiel kontentige posttagmeze, kiel ni sukcesis ĉi-matene, ni forlasos la Montetaron antaŭ ol la Suno subiĝos, kaj trotetos antaŭen serĉante kampadejon.

Sed parolante li jam ekrigardis orienten, kaj li vidis, ke tiuflanke la montoj estas pli altaj kaj subenrigardas al ili; kaj ĉiujn tiujn montojn kronis verdaj ondaĵoj, kaj sur kelkaj estis starantaj ŝtonoj, kiuj direktiĝis supren kvazaŭ akrangulaj dentoj el verda dentkarno.

Tiu vidaĵo estis ial maltrankviliga; do ili sin turnis de ĝi kaj descendis en la kavan cirklon. Meze de ĝi staris unuopa ŝtono, alta sub la suno supre, kaj tiuhore tute senombra. Ĝi estis senforma kaj tamen signifoplena: kiel vojmontrilo, aŭ gardanta fingro, aŭ prefere averto. Sed ili jam estis malsataj, kaj la suno ankoraŭ ĉe la sentima zenito; do ili apogis siajn dorsojn al la orienta flanko de la ŝtono. Ĝi estis malvarmeta, kvazaŭ la suno ne kapablis varmigi ĝin; sed tiutempe tio ŝajnis agrabla. Tie ili manĝis kaj trinkis, kaj tiel bone regalis sin sub la plena ĉielo, kiel oni povis deziri; ĉar la nutraĵoj devenis de “sube sub-Montete”. Tom provizis pli ol sufiĉe por la taga komforto. Iliaj poneoj malŝarĝitaj vagadis sur la herbo.

Rajdado trans la montetojn, satiga manĝado, la varma suno kaj la gazonodoro, iom tro longa kuŝado, kruretendado kaj ĉielrigardado trans la nazoj: ĉio ĉi, eble, sufiĉas por klarigi tion, kio okazis. Kiel ajn: ili vekiĝis subite kaj malkomforte el dormo, kiun ili neniam intencis. La staranta ŝtono estis malvarma, kaj etendis longan palan ombron orienten super ili. La suno, pale kaj akvece flava, trabrilis nebuleton ĝuste super la okcidenta rando de la kavaĵo, en kiu ili kuŝis; norde, sude kaj oriente, post la muro, nebulo estis densa, malvarma kaj blanka. La aero estis silenta, peza kaj frosta. Iliaj poneoj staris kunpuŝiĝinte kun la kapoj klinitaj.

La hobitoj saltstariĝis timigite kaj alkuris la okcidentan randon. Ili trovis sin sur insulo en la nebulo. Ĝuste dum ili rigardis konsternite al la sinkanta suno, tiu dronis antaŭ iliaj okuloj en maro blanka, kaj malvarma griza ombro aperis malantaŭ ili oriente. La nebulo alruliĝis ĝis la muroj kaj

baŭmis super ilin, kaj suprenirante ĝi kurbiĝis super iliaj kapoj kaj tegmentiĝis: ili estis enfermitaj en halo de nebulo, kies centra pilastro estis la staranta ŝtono.

Ili sentiĝis kvazaŭ kaptilo fermiĝas ĉirkaŭ ili; sed ili ne tute perdis kuraĝon. Ili ankoraŭ memoris la esperigan vidaĵon pri la linio de la Vojo antaŭe, kaj ili ankoraŭ sciis, en kiu direkto ĝi troviĝis. Ĉiuokaze, ili jam tiel malamis tiun kavan lokon ĉirkaŭ la ŝtono, ke neniu penso pri restado tie estis en iliaj mensoj. Ili enpakis ĉion tiel rapide, kiel funkciis iliaj frostigitaj fingroj.

Baldaŭ ili kondukis siajn poneojn spalire trans la randon kaj suben laŭ la norda deklivo de la monteto, malsupren en la nebulomaron. Dum ili descendis, la nebulo iĝis pli malvarma kaj pli malseketa, kaj iliaj haroj pendis malkrispaj kaj gutantaj sur la fruntoj. Kiam ili alvenis la fundon, estis tiel malvarme, ke ili haltis kaj elprenis kapuĉojn kaj mantelojn, kiuj baldaŭ kovriĝis de grizaj roseroj. Poste surseliĝinte, ili malrapide pluiris denove, palpante la vojon laŭ altiĝoj kaj malaltiĝoj de la tero. Ili direktis sin, laŭ sia plej bona konjekto, al la pordsimila trairejo ĉe la plej norda fino de la longa valo, kiun ili vidis matene. Kiam ili trairus tiun breĉon, necesus nur daŭrigi laŭ proksimume rekta linio, kaj ili nepre trafus finfine la Vojon. Iliaj pensoj ne preteriris tion, escepte de svaga espero, ke eble ie aliflanke de l' Montetaro ne plu estos nebulo.

La progreso estis tre malrapida. Por malhelpi disiĝon kaj disvagon diversdirekten ili iris spalire, kun Frodo antaŭe. Post li iris Sam, poste Grinĉjo, kaj fine Gaja. La valo ŝajnis etendiĝi senfine. Subite Frodo vidis esperigan signon. Je ambaŭ flankoj antaŭe komencis baŭmi tra la malhelo iu mallumaĵo; kaj li konjektis, ke ili finfine proksimiĝas al la monteta breĉo, la norda pordo de la Dolmenejo. Se ili tion preterpasus, ili estus liberaj.

— Antaŭen! Sekvu min! — li revokis trans la ŝultron, kaj li rapidis antaŭen. Sed lia espero baldaŭ transformiĝis al konfuziĝo kaj ektimo. La mallumaĵoj pli densiĝis, sed ili ŝrumpis; kaj subite li vidis, baŭmantaj antaŭ li kaj kliniĝantaj unu al alia kvazaŭ pilastroj de sensupraĵa pordo, du grandegajn starantajn ŝtonojn. Li ne memoris ekvidi signon de tiuj en la valo, kiam li rigardis de la montverto matene. Li trapasis inter ili preskaŭ antaŭ ol li konsciis pri tio: kaj ĝuste tiam mallumo ŝajnis estiĝi ĉirkaŭ li. Lia poneo baŭmis kaj snufegis, kaj li defalis. Kiam li rigardis malantaŭen, li estis sola: la aliaj ne sekvis lin.

— Sam! — li vokis. — Grinĉjo! Gaja! Venu! Kial vi ne tenas kontakton?

Respondo ne venis. Timo ekkaptis lin, kaj li rekuris preter la ŝtonojn kriante maltrankvilege:

— Sam! Sam! Gaja! Grinĉjo! — La poneo kuregis en la nebulon kaj malaperis. De malproksime, aŭ tiel ŝajnis, li supozis aŭdi krion: “Oj! Frodo! Oj!” Ĝi estis fora oriente, maldekstre dum li staris sub la ŝtonegoj kaj streĉe enrigardegis la malhelon. Li ekkuris direkte al la voko kaj trovis, ke li iras apike supren.

Dum li baraktis antaŭen li denove vokis kaj daŭre vokadis pli kaj pli frenezece; sed dum kelka tempo li ne aŭdis respondon, kaj poste ĝi ŝajnis mallaŭta kaj malproksima antaŭ li kaj alta super li. “Frodo! Oj!” aŭdiĝis la maldensaj voĉoj el la nebulo; kaj poste krio, kiu sonis kiel “helpon, helpon!” ofte ripetiĝis, finiĝanta per lasta “helpon!”, kiu forfadiĝis al longa lamento subite ekĉesigita. Li stumblis antaŭen laŭeble rapide direkte al la krioj; sed lumo jam foriris, kaj kroĉiĝanta nokto fermiĝis ĉirkaŭ lin, tiel ke estis neeble certiĝi pri iu ajn direkto. Li ŝajnis la tutan tempon grimpadi ĉiam supren.

Nur ŝanĝiĝo de la nivelo de l’ tero sub liaj piedoj sciigis al li, ke li finfine atingis la supron de firsto aŭ monteto. Li estis lacega, ŝvitanta kaj tamen frostigita. Estis komplete mallume.

— Kie vi estas? — li kriis despere.

Mankis respondo. Li staris aŭskultante. Li subite konstatis, ke iĝas tre malvarme, kaj ke tie ĉi supre komencas blovi vento, vento glacia.

Ŝanĝiĝo okazis de l’ vetero. La nebulo jam preterfluis lin ĉifite-ŝirite. Lia spiro fumis, kaj la mallumo estis malpli proksima kaj malpli densa. Li rigardis supren kaj vidis surprizite, ke briletaj steloj aperis super la kapo inter la strioj de rapidantaj nubo kaj nebulo. Vento komencis sibli trans la herbon.

Al li subite ŝajnis, ke li ekaŭdis sordinitan krion, kaj li ekiris tien, kaj ĝuste kiam li antaŭeniris, la nebulo estis volvita kaj flanken puŝita, kaj senvualiĝis la steloza ĉielo. Rigardo vidigis, ke nun li frontas suden kaj troviĝas sur ronda montetoverto, kiun li certe grimpis el la nordo. El oriento blovis la mordanta vento. Dekstre de li baŭmis antaŭ la okcidentaj steloj minaca nigra formaĵo. Staris tie tumulego.

— Kie vi estas? — li kriis denove, tiel kolera kiel timanta.

— Jen mi! — diris voĉo, profunda kaj malvarma, kiu ŝajnis veni el la tero. — Mi vin atendas!

— Ne! — diris Frodo; sed li ne forkuris. Liaj genuoj kolapsis, kaj li falis al la tero. Okazis nenio, kaj neniu sono aŭdiĝis. Tremante li suprenrigardis, ĝustatempe por vidi altan malhelan figuron kiel ombron antaŭ la steloj. Ĝi kliniĝis super li. Ŝajnis al li, ke vidiĝas du okuloj, tre fridaj kvankam lumigitaj per pala lumo, kiu ŝajnis veni el iu foro. Poste teno pli forta kaj pli malvarma ol fero ekkaptis lin. Tiu glacieca tuŝo frostigis liajn ostojn, kaj li

nenion plu memoris.

Kiam li rekonsciiĝis, li momente nenion povis memori krom sento de teruriĝo. Poste li sciis subite, ke li estas enkarcerigita, senespere kaptita; li troviĝis sub dolmeno. Dolmenulo kaptis lin, kaj lin probable jam influis la teruraj sorĉaĵoj de l' dolmenuloj, pri kiuj parolis flustrataj rakontoj. Li ne aŭdacis moviĝi, sed kuŝadis tiel, kiel li sin trovis: plata surdorse sur malvarma ŝtono kun la manoj sur la brusto.

Tamen, kvankam lia timo estis tiel granda, ke ĝi ŝajnis parto de la mallumo mem, kiu ĉirkaŭis lin, li trovis, ke dum la kuŝado li pensas pri Bilbo Baginzo kaj ties rakontoj, dum ili trotetis kune laŭ la vojetoj de la Provinco kaj parolis pri vojaĝoj kaj aventuroj. En la koro de la plej grasa kaj plej timema hobito estas kaŝita (ofte profunde, estas vere) semo de kuraĝo, kiu atendas iun lastan kaj malesperigan danĝeron por kreski. Frodo estis nek tre grasa nek tre timema; efektive, kvankam tion li ne sciis, Bilbo (kaj Gandalfo) taksis lin la plej bona hobito en la Provinco. Al li ŝajnis, ke li alvenis la finon de sia aventuro, kaj finon teruran, sed tiu supozo hardis lin. Li rimarkis, ke li fortiĝas, kvazaŭ por fina salto; li ne plu sentis sin faldiĝema kiel sendefenda predo.

Kuŝante tie, pensante kaj sin ordigante, li rimarkis, ke subite la mallumo lante foriĝas: kreskas ĉirkaŭ li pale verdeca lumo. Tiu unue ne montris al li, en kia loko li troviĝis, ĉar la lumo ŝajnis deveni de li mem kaj el la planko apude, kaj ĝi ankoraŭ ne atingis la tegmenton aŭ muron. Li turnis sin, kaj en la frida glimado li vidis kuŝantaj apud li Samon, Grinĉjon kaj Gajan. Ili kuŝis surdorse, kaj iliaj vizaĝoj aspektis mortece palaj; kaj ili estis blanke vestitaj. Ĉirkaŭ ili kuŝis multaj trezoroj, eble el oro, kvankam en tiu lumo ili aspektis malvarmaj kaj nebelaj. Sur iliaj kapoj estis cirklaĵoj, oraj ĉenoj ĉirkaŭis iliajn taliojn, kaj sur iliaj fingroj estis multaj ringoj. Glavoj kuŝis ĉe iliaj flankoj, kaj ŝildoj ĉe iliaj piedoj. Sed trans iliaj tri koloj kuŝis unuopa longa nuda glavo.

Subite komenciĝis kanto: frida murmuro, leviĝanta kaj falanta. La voĉo ŝajnis tre malproksima kaj ekstreme morna, foje alta en la aero kaj maldensa, foje simila al mallaŭta ĝemo el la tero. El la senforma fluado de tristaj sed terurigaj sonoj, vortfadenoj de tempo al tempo formis sin: vortoj severaj, duraj, malvarmaj, senkoraj kaj melankoliaj. La nokto estis protestanta pri la mateno, de kiu ĝi estis senigita, kaj la frido malbenis la varmon, kiun ĝi soifis. Frodo estis ĝismedole frostigita. Post kelka tempo la kanto iĝis pli klara, kaj kun timego en la koro li konstatis, ke ĝi ŝanĝiĝis al ĉanto sorĉa:

Fridu mano, kor' kaj osto,
kaj fridu dormo sub ŝtonfosto:

neniam plu vekiĝ’ sur ŝtona lito,
ĝis mortos Lun’, Sun’ estos estingito.
En nigra vent’ la steloj ĉesos brili,
kaj daŭre plu sur oro kuŝos ili,
ĝis manon levos Mastro de l’ mallumo
super mortinta mar’ kaj ter’ sen humo.

Li aŭdis malantaŭ la kapo sonon grincan kaj skrapan. Apogante sin per unu brako li rigardis, kaj nun vidis per la pala lumo, ke ili estas en speco de koridoro, kiu malantaŭ ili turniĝis ĉirkaŭ angulon. Laŭ tiu angulo palpadis longa brako, irante surfingre al Sam, kiu kuŝis plej proksime, kaj al la tenilo de l’ glavo, kiu kuŝis sur li.

Komence Frodo sentis, ke li ŝtoniĝis pro la sorĉa kanto. Poste venis al li en la kapon frenezeca eskapebleco. Li scivolis, ĉu, se li surmetus la Ringon, la dolmenulo eble maltrafus lin, kaj li eble trovus ian elirvojon. Li imagis, ke li kuradas libere sur la herbo, funebrante Grinĉjon, kaj Samon, kaj Gajan, sed mern libera kaj vivanta. Eĉ Gandalfo konsentus, ke nenio alia estis farebla.

Sed la kuraĝo, kiu estis vekita en li, estis jam tro forta; ne tiel facilanime li kapablus forlasi la amikojn. Li ŝanceliĝis, palpante en sia poŝo, kaj poste denove luktis en si; kaj dum li tion faris, la brako rampe proksimiĝis. Subite deeidiĝo fortiĝis en li, kaj li kaptis mallongan glavon, kiu kuŝis apude, kaj surgenuiĝe li klinis sin malalte super la korpoj de siaj kunuloj. Per la havebla forto li hakis la rampantan brakon proksime al la pojno, kaj la mano forfalis; sed sammomente la glavo dissplitiĝis ĝis la tenilo. Aŭdiĝis ŝriko kaj la lumo malaperis. En la mallumo aŭdiĝis bruo mordminaca.

Frodo falis antaŭen sur Gajan, kaj la vizaĝo de Gaja sentiĝis malvarma. Tutsubite revenis en lian menson, el kiu ĝi malaperis kiam unue aperis la nebulo, memoro pri la domo sub la Monteto kaj pri la kanto de Tom. Li rememoris la rimaĵon, kiun Tom instruis al ili. Per malforta senespera voĉo li komencis: “Ho! Torn Bombadiljo!” kaj je tiu nomo lia voĉo ŝajnis fortiĝi: ĝi havis sonon plenan kaj viglan, kaj la malluma ĉambro reeĥis kvazaŭ pro tamburo kaj trumpeto:

Ho! Tom Bombadil’, Tom Bombadiljo!
Je akvo, arb’, monteto, kariko kaj saliko,
je fajro, sun’ kaj luno, aŭdu! ni admonas!
Venu, Tom Bombadiljo, ĉar ni vin bezonas!

Okazis subita profunda silentiĝo, en kiu Frodo povis aŭdi batadon de sia koro. Post longa malrapida momento li aŭdis klare, sed tre malproksime, kvazaŭ ĝi venus suben tra la tero kaj tra dikaj muroj, respondan voĉon, kiu

kantis:

Olda Bombadiljo gajhumoron havas;
bluas lia jako, kaj la botoj flavas.
Tom estas mastro, neniu lin insidas:
pli fortas liaj kantoj, la piedoj pli rapidas.

Aŭdiĝis laŭta murmurego, kvazaŭ pro ruliĝado kaj falado de ŝtonoj, kaj subite enfluis lumo, lumo reala, la ordinara taglumo. Malalta pordsimila aperturo vidiĝis en la ĉambrofino apud la piedoj de Frodo; kaj jen estis la kapo de Tom (ĉapelo, plumo kaj ĉio kuna) kadrita antaŭ la lumo de la suno ruĝe leviĝanta malantaŭ li. La lumo trafis la plankon, kaj la vizaĝojn de la tri hobitoj kuŝantaj apud Frodo.

Ili ne ekmoviĝis, sed la malsaneca koloro jam forlasis ilin. Ili nun aspektis kvazaŭ nur tre profunde dormantaj.

Tom kliniĝis, formetis la ĉapelon, kaj venis en la malhelan ĉambron, kantante:

Iru, Oldulaĉo! En sunlumo malaperu!
Ŝrumpu kiel nebuleto, kiel ventoj veu,
al la ter' senfrukta preter la montaro!
Neniam plu revenu! Lasu la dolmenon!
Perdiĝu, forgesiĝu, malhela pli ol ombro,
kie pord' fermitas ĝis la mond' rebonos.

Je tiuj vortoj aŭdiĝis krio kaj parto de la interna fino de la ĉambro enfalis krakege. Sekvis longa tirata ŝriko, forfadiĝanta ĝis nekonebla foro; kaj post tio silento.

— Venu, amiko Frodo! — diris Tom. — Ni eliru sur puran herbon! Vi devas helpi min elporti ilin.

Kune ili elportis Gajan, Grinĉjon kaj Samon. Kiam Frodo lastfoje eliris la dolmenon, li rimarkis detranĉitan manon ankoraŭ skuiĝantan, kvazaŭ vundita araneo, en amaseto da falinta tero. Tom reeniris, kaj aŭdiĝis multe da pistado kaj stamfado. Kiam li elvenis, li portis sur la brakoj grandan amason da trezoro: objektoj oraj, arĝentaj, kupraj kaj bronzaj; multaj bidoj kaj ĉenoj kaj juvelitaj ornamaĵoj. Li surgrimpis la verdan dolmenon kaj kuŝigis ĉion supre sub la sunlumo.

Tie li staris, kun la ĉapelo en la mano kaj vento tra la hararo, kaj rigardis suben al la tri hobitoj, kiuj estis kuŝigitaj surdorse je la okcidenta flanko de la tumulo. Levinte sian dekstran manon li diris per klara kaj ordona voĉo:

Jam vekiĝu, ho bravuloj! Aŭdu mian vokon!
Varmu kor' kaj membroj nun! Falis frida ŝtono;

Nigra pord’ apertas; morta man’ rompiĝis.
Nokt’ sub Nokton fuĝis, kaj la Pord’ apertas!

Je granda ĝojo de Frodo la hobitoj ekmoviĝis, etendis siajn brakojn, frotis la okulojn, kaj poste subite stariĝis. Ili ĉirkaŭrigardis mirigite, unue al Frodo, kaj poste al Tom staranta vivoplena super ili; kaj poste al si mem en la maldikaj blankaj ĉifonoj, kronite kaj zonite de pala oro, kaj tintante pro ornamaĵoj.

— Kion je la nomo de l’ miro? — komencis Gaja, palpante la oran cirklaĵon, kiu jam deglitis sur unu okulon. Poste li ĉesis, kaj ombro aperis sur lia vizaĝo, kaj li fermis la okulojn. — Kompreneble, jam mi memoras! La viroj de Karn Dum alvenis nokte, kaj ni estis venkitaj. Ha! la lanco en mia koro! — Li kroĉis sian bruston. — Ne! Ne! — li diris, malfermante la okulojn. — Kion mi diras? Mi sonĝis. Kien vi foriris, Frodo?

— Al mi ŝajnis, ke mi perdiĝis, — diris Frodo, — sed pri tio mi ne volas paroli. Ni pensu pri tio, kion ni nun faros! Ni antaŭeniru!

— Tiel vestite, sinjoro? — diris Sam. — Kie estas miaj vestaĵoj? — Li ĵetis sur la herbon siajn cirklaĵon, zonon, kaj ringojn, kaj ĉirkaŭrigardis senhelpe, kvazaŭ li atendus trovi ie apude siajn mantelon, jakon, pantalonon, kaj ceterajn hobitvestaĵojn.

— Vi ne retrovos viajn vestaĵojn, — diris Tom, desaltante de sur la tumulo, kaj ridante dum li dancis ĉirkaŭ ili en la sunbrilo. Oni supozus, ke okazis nenio danĝera aŭ teruriga; kaj fakte la timego foriris el iliaj koroj dum ili rigardis lin kaj vidis la gajan ekbrilon de liaj okuloj.

— Kion vi celas? — demandis Grinĉjo, rigardante lin, duone konfuzite kaj duone amuzite. — Kial ne?

Sed Tom skuis la kapon, dirante:

— Vi retrovis vin, el la profunda akvo. Vestaĵoj signifas nur etan perdon, se vi eskapas droniĝon. Ĝoju, amikoj gajaj, kaj lasu, ke la varma sunbrilo ardigu jam koron kaj membrojn! Forĵetu tiujn malĝojajn ĉifonojn! Kuru nudaj sur la herbo, dum Tom iras ĉasadi!

Li forsaltis suben laŭ la deklivo, fajfante kaj kriante:

Jen do! Venu do! Vi vagadas kien?
Supren, suben, foren, alen, tien ĉi aŭ tien?
Akr-orela, Saĝnaza, Flirtvosta, Fola,
Blankŝtrumpa eta mia, kaj Grasul’ Pendola!

Tiel li kantis, kurante rapide, ĵetante sian ĉapelon kaj ĝin kaptante, ĝis kaŝis lin kurbiĝo de la tero; sed ankoraŭ dum kelka tempo lia “jen do! venu do!” revenis flose laŭ la vento, kiu jam turniĝis suden.

La aero estis denove varmiĝanta. La hobitoj ĉirkaŭkuris kelkan tempon

sur la herbo laŭ lia instrukcio. Poste ili kuŝis sunumante sin laŭ la ĝojsento de tiuj, kiuj estas subite transdonitaj el frostega vintro ĝis klimato simpatia, aŭ de homoj, kiuj dumlonge malsanaj kaj enlitaj vekiĝas iun tagon por trovi sin neatendite bonfartaj, kaj la tago estas denove promesplena.

Kiam Tom revenis ili sentiĝis jam fortaj (kaj malsataj). Li reaperis, unue la ĉapelo, el trans la verto de l' monteto, kaj malantaŭ li venis laŭ obeema spaliro *ses* poneoj: ilia propra kvino plus ankoraŭ unu. Tiu lasta evidente estis Grasul' Pendola: ĝi estis pli granda, pli forta, pli grasa (kaj pli aĝa) ol iliaj propraj poneoj. Gaja, al kiu apartenis la aliaj, fakte ne donis al ili tiajn nomojn, sed ili respondis al la novaj nomoj donitaj de Tom dum la tuta cetera vivo. Tom vokis ilin unu post alia kaj ili transgrimpis la verton kaj stariĝis en vico. Poste Tom riverencis al la hobitoj.

— Jen do viaj poneoj! — li diris. — Ili havas pli da sagaco (certamaniere) ol vi vagemaj hobitoj — pli da sagaco en siaj nazoj. Ĉar ili flaras anticipe danĝeron, al kiu vi rekte marŝas; kaj se ili forkuras por savi sin, ili kuras laŭ la ĝusta direkto. Vi devas pardoni al ili ĉiuj; ĉar malgraŭ la fidelaj koroj, por fronti al timo pri la dolmenuloj ili ne estas kreitaj. Vidu, jen ili revenis, kunportante siajn ŝarĝojn!

Gaja, Sam kaj Grinĉjo nun vestis sin per rezervaj vestaĵoj el la pakaĵoj; kaj baldaŭ ili sentis sin tro varmaj, ĉar ili estis devigitaj surmeti kelkajn el la pli dikaj kaj pli varmigaj vestaĵoj, kiujn ili kunportis pro la alproksimiĝo de la vintro..

— Kio pri tiu alia pli aĝa besto, tiu Grasul' Pendola? — demandis Frodo.

— Ĝi estas mia, — diris Tom. — Mia kvarkrura amiko; tamen mi malofte rajdas ĝin, kaj ĝi vagas ofte malproksimen, libera sur la montetoj. Kiam viaj poneoj estis ĉe mi, ili ekkonis mian Pendolan; kaj ili flaris ĝin en la nokto, kaj kuris rapide renkonte al ĝi. Mi pensis, ke ĝi serĉus ilin kaj per siaj saĝaj vortoj forigus ilian timon. Sed nun, mia gaja Pendola, olda Tom intencas rajdi. Hej! li akompanos vin, nur por ekirigi vin sur la vojon; do li bezonas poneon. Ĉar ne facile oni alparolas hobitojn rajdantajn, kiam per propraj kruroj oni klopodas troti apude.

La hobitoj ĝojis aŭdi tion, kaj multfoje dankis al Tom; sed li ridis, kaj diris, ke ili havas tian talenton perdiĝi, ke li ne estus feliĉa ĝis li vidos ilin sekuraj trans la bordoj de lia tereno.

— Mi havas farendaĵojn, — li diris: — mian kreadon kaj mian kantadon, mian paroladon kaj mian promenadon, kaj mian prizorgon de la tereno. Tom ne povas ĉiam apudi apertajn pordojn kaj saliko-fendetojn. Tom havas domon prizorgendan, kaj Orbero atendas.

Laŭ la suno, estis ankoraŭ sufiĉe frue, ie inter la naŭa kaj la deka, kaj la

hobitoj turnis sian atenton al manĝado. Ilia lasta manĝo estis tagmanĝo hieraŭ apud la staranta ŝtono. Nun ili matenmanĝis per la restaĵo de l' provianto de Tom, intencita por la vespermanĝo, kun aldonaĵoj alportitaj de Tom. Tio ne estis manĝo granda (laŭ hobita kriterio kaj la cirkonstancoj), sed ili sentis sin pli bonaj manĝinte. Dum ili manĝis, Tom iris sur la tumulon, kaj trarigardis la trezorojn. La plimultajn el ili li staplis, kaj ili rebrilis sur la herbo. Li ordonis, ke ili kuŝu tie "je dispono de ĉiuj trovontoj, birdoj, bestoj, elfoj aŭ homoj, kaj ĉiuj bonintencaj kreitaĵoj"; ĉar tiel la sorĉo de la amaseto estus rompita kaj dispelita kaj neniu dolmenulo iam ajn revenus al ĝi. Li elektis por si el la staplo broĉon kun bluaj gemoj, multnuancaj kiel linfloroj aŭ la flugiloj de bluaj papilioj. Li longe rigardis ĝin, kvazaŭ movite pro iu memoro, skuante la kapon, kaj dirante finfine:

— Jen bela bagatelo por Tom kaj por lia damo! Bela estis tiu, kiu antaŭlonge portis ĝin sur la ŝultro. Orbero nun portos ĝin, kaj ŝin ni ne forgesos!

Por la hobitoj li elektis po ponardon, longan, foliforman, kaj akran, mirinde metiecan, damaskenitan je serpentformoj ruĝaj kaj oraj. Ili ekbrilis, kiam li eltiris ilin el la nigraj ingoj, faritaj el iu stranga metalo, peza kaj forta, kaj inkrustitaj de multaj ardaj gemoj. Ĉu pro iu kvalito de tiuj ingoj, ĉu pro la sorĉo, kiu kuŝis sub la tero, la klingoj ŝajnis netuŝitaj de la tempopaso, senrustaj, akraj, brilantaj en la sunlumo.

— Malnovaj tranĉiloj sufiĉe longas kiel glavoj por la hobit-popolo, — li diris. — Estas bone havi akrajn klingojn, se la provincanoj promenadas, orienten, suden, aŭ malproksimen al mallumo kaj danĝero. — Poste li rakontis al ili, ke tiuj klingoj estis forĝitaj antaŭ multaj jaroj de viroj el okcidento: ili estis malamikoj de la Malluma Mastro, sed ilin venkis la malvirta reĝo de Karn Dum en la lando Angmaro.

— Jam malmultaj memoras ilin, — Tom murmuris, — tamen iuj ankoraŭ vagadas, filoj de forgesitaj reĝoj, promenante en soleco, gardante kontraŭ misuloj personojn senatentajn.

La hobitoj ne komprenis liajn vortojn, sed dum li parolis ili spertis vizion kvazaŭ longan jaretendiĝon malantaŭ ili, kiel vasta ombreca ebenaĵo sur kiu marŝas figuroj de viroj, altaj kaj minacaj kun helaj glavoj, kaj kiel lasta venis iu kun stelo sur la frunto. Poste la vizio malaperis, kaj ili troviĝis denove en la sunhela mondo. Estis tempo ekiri denove. Ili pretigis sin, pakante siajn valizojn kaj ŝarĝante siajn ponecjn. Siajn novajn armilojn ili pendigis al la ledaj zonoj sub siaj jakoj, sentante ilin tre ĝenaj, kaj scivolante, ĉu ili iam kaj iel utilus. Batalado pli frue ne prezentiĝis al ili kiel unu el la aventuroj, en kiun ilia fuĝo trempos ilin.

Finfine ili ekiris. Ili kondukis siajn ponecjn suben laŭ la deklivo; kaj

poste surseliĝinte ili trotis rapide tra la valo. Ili retrorigardis kaj vidis la supron de la malnova tumulo, kaj de ĝi la sunlumo sur la oro supreniris kvazaŭ flava flamo. Poste ili ĉirkaŭiris ŝultron de la montetaro kaj ĝi ne plu videblis.

Kvankam Frodo ĉirkaŭrigardis ĉiuflanken, li tute ne vidis la ŝtonegojn starantajn kiel pordo, kaj postnelonge ili alvenis la nordan trabreĉon kaj rapide trarajdis, kaj antaŭ ili la tereno descendis apike. Tio estis gaja vojaĝo. Tom Bombadiljo trotis bonhumore apud ili aŭ antaŭ ili sur Grasul' Pendola, kiu kapablis moviĝi multe pli rapide ol supozigis lia dikeco. Tom kantis preskaŭ la tutan tempon, sed estis plejparte sensencaĵo, aŭ eble fremda lingvo nekonata al la hobitoj, lingvo antikva, kies vortoj estis grandparte tiuj de miro kaj ĝojo.

Ili antaŭeniris konstante, sed ili baldaŭ konstatis, ke la Vojo estas pli malproksima ol ili supozis. Eĉ sen nebulo, ilia tagmeza dormo estus malhelpinta, ke ili alvenu ĝin antaŭ la hieraŭa noktiĝo. La malhela linio, kiun ili vidis, ne estis vico da arboj, sed linio da arbustoj kreskantaj rande de profunda fosaĵo kun alta muro aliflanke. Tom diris, ke tio estis iam limo de reĝlando, sed antaŭ tre-tre longe. Li ŝajnis memori pri ĝi ion tristan, kaj ne volis multon diri.

Ili grimpis en kaj el la fosaĵon kaj tra breĉo en la muro, kaj poste Tom turniĝis rekte norden, ĉar ili estis celintaj iom okcidenten. La tereno estis nun aperta kaj sufiĉe ebena, kaj ili rapidigis siajn paŝojn, sed la suno jam sinkis malalten, kiam finfine ili vidis antaŭe vicon da altaj arboj, kaj ili sciis, ke ili revenis al la Vojo post multaj neatenditaj aventuroj. Ili galopigis siajn ponejn trans la lastajn mejlonojn, kaj haltis en la longaj ombroj de la arboj. Ili nun troviĝis supre de dekliva teramaso, kaj la Vojo, jam malhela pro proksimiĝo de l' vespero, forserpentumis sub ili. Tiuloke ĝi direktiĝis preskaŭ de sud-okcidento nord-orienten, kaj dekstre ĝi descendis apike en larĝan valon. Ĝi estis sulkoplena kaj montris multajn signojn pri la peza lastatempa pluvado; troviĝis lagetoj kaj akvoplenaj truetoj.

Ili rajdis suben laŭ la taluso kaj rigardis ĉiudirekten. Nenio estis videbla.

— Nu, jen ni denove! — diris Frodo. — Supozeble ni ne perdis pli ol du tagojn pro mia kurtvojo tra la Arbaro! Sed eble tiu prokrasto pruviĝos utila — ĝi eble perdigis al ili niajn postsignojn.

La aliaj lin rigardis. Ombro de timo pri la Nigraj Rajdantoj subite inundis ilin denove. Ĉiam depost la eniro en la Arbaron ili pensis ĉefe pri reatingo de la Vojo; nur kiam ĝi kuŝis sub la piedoj ili rememoris la danĝeron, kiu persekutis ilin, kaj plej probable embuskas ilin sur la Vojo mem. Ili retrorigardis maltrankvile al la subiranta suno, sed la Vojo estis bruna kaj malplena.

— Ĉu vi supozas, — demandis Grinĉjo heziteme, — ĉu vi supozas, ke ni estos persekutataj, ĉi-vespere?

— Ne, mi esperas, ke ne ĉi-vespere, — respondis Tom Bombadiljo, — eble ankaŭ ne morgaŭ. Sed ne fidu mian konjekton, ĉar mi ne povas certe antaŭvidi. Oriente miaj konoj velkas. Tom ne mastras Rajdantojn el la Nigra Lando malproksima de lia tereno.

Tamen la hobitoj volis, ke li akompanu ilin. Ili sentis, ke li scius pritrakti la Nigrajn Rajdantojn, se iu kapablus tion. Jam baldaŭ ili venos en landojn tute fremdajn al ili, kaj ekster ĉiuj legendoj de la Provinco, krom la plej svagaj kaj antikvaj, kaj en la krepuskiĝo ili sopiris al sia hejmo. Profunda soleco kaj perdosento inundis ilin. Ili staris silentaj, malemaj okazigi la finan disiĝon, kaj nur malrapide konstatis, ke Tom adiaŭas ilin, dirante, ke ili estu bravaj kaj rajdu senhalte ĝis la mallumiĝo.

— Tom donos al vi bonan konsilon, ĝis la fino de tiu ĉi tago (poste devos vin kuniri kaj gvidi via propra bonŝanco): post kvar mejloj laŭ la Vojo vi venos al vilaĝo Brio sub Brimonteto, kun pordoj frontantaj okcidenten. Tie vi trovos malnovan tavernon, kiu nomiĝas *La Pranca Poneo*. Barlimano Buterburo estas la bona tavernisto. Tie vi povos tranokti, kaj poste la mateno lanĉos vin survojen. Estu bravaj, tamen singardaj! Vartu viajn gajajn korojn, kaj rajdu renkonten al la fortuno!

Ili petegis, ke li venu almenaŭ ĝis la taverno kaj trinku ankoraŭ unufoje kun ili; sed li ridis kaj malakceptis, dirante:

Tom-tereno jen finiĝas; trans la limon li ne iros.
Tom prizorgu sian domon, kaj atendas lin Orbero!

Poste li sin turnis, suprenĵetis la ĉapelon, saltis sur la dorson de Pendola, kaj rajdis supren trans la taluson kaj foriris kantante en la krepuskon.

La hobitoj grimpis supren kaj postrigardis lin ĝis li forpasis el ilia vidkampo.

— Mi bedaŭras adiaŭi Mastron Bombadiljo, — diris Sam. — Li estas unikulo, sendiskute. Mi opinias, ke ni eble vojos tre malproksimen tamen vidos nenion pli bonan, nek pli strangan. Sed mi ne kontraŭdiros, ke mi ĝojos vidi tiun *Pranca Poneo*, kiun li menciis. Espereble ĝi similas al la *Verda Drako* hejme! Kiaj personoj estas en Brio?

— Loĝas hobitoj en Brio, — diris Gaja, — kiel ankaŭ granduloj. Supozeble ĝi estos sufiĉe hejmeca. *La Poneo* estas bona taverno laŭdire. Miaj amikoj rajdas tien de tempo al tempo.

— Ĝi povas esti ĉio dezirinda, — diris Frodo, — sed ĉiuokaze ĝi troviĝas ekster la Provinco. Ne sentu vin tro hejme! Bonvolu memori — vi ĉiuj — ke lanomo Baginzo devas *ne* menciiĝi. Mi estas s-ro Submonteto, se

nomo estas mencienda.

Ili surseliĝis kaj enrajdis silente la vesperon. Mallumo venis rapide, dum ili plandis malrapide suben-supren laŭ la deklivoj, ĝis fine ili vidis lumojn ekbrilantaj iom antaŭe.

Antaŭ ili leviĝis Brimonteto barante la vojon, malhela amaso antaŭ nebulecaj steloj; kaj sub ties okcidenta flanko kaŭris granda vilaĝo. Tien ili nun rapidis, dezirante nur trovi fajron kaj pordon inter ili kaj la nokto.

9

Ĉe signo de la Pranca Poneo

Brio estis la ĉefa vilaĝo de Brilando, eta loĝata regiono, kvazaŭ insulo en la malplenaj terenoj ĉirkaŭe. Krom Brio mem estis Tribasio aliflanke de l' monteto, Kavio en profunda valo iom pli oriente kaj Arketo rande de la Ĉetarbaro. Brimonteton kaj la vilaĝojn ĉirkaŭis malgranda strio da kampoj kaj malsovaĝigita arbetaro larĝa nur kelkajn mejlojn.

La homoj en Brio estis brunharaj, larĝaj, kaj iom malaltaj, bonhumoraj kaj sendependaj: ili apartenis al neniu krom si mem; sed ili estis pli amikemaj kaj familiaraj al hobitoj, gnomoj, elfoj, kaj aliaj loĝantoj en la ĉirkaŭanta mondo, ol estas (aŭ -is) kutime ĉe granduloj. Laŭ la propraj historioj ili estis la originaj loĝantoj kaj estis posteuloj de la unuaj homoj, kiuj iam envagis la okcidenton de la Mez-Tero. Malmultaj transvivis la tumultojn de la Praaj Tagoj; sed kiam la reĝoj revenis trans la Grandaj Maroj, ili trovis ankoraŭ tie la briajn homojn, kaj tie ili plu estadis, kiam memoro pri la malnovaj reĝoj jam fadis en la herbon.

Tiutempe neniuj aliaj homoj posedis daŭrajn loĝejojn tiel okcidente, aŭ malpli ol tricent mejlojn de la Provinco. Sed en la sovaĝejoj aliflanke de Brio estis misteraj vagantoj. Tiujn la bri-homoj nomis disiruloj, kaj sciis nenion pri ties origino. Ili estis pli altaj kaj pli malhelaj ol la homoj de Brio, kaj oni kredis, ke ili havas strangajn vidkaj aŭd-kapablojn kaj komprenas la lingvojn de birdoj kaj bestoj. Ili vagis laŭvole suden kaj orienten eĉ tiel malproksimen kiel la Nebulecaj Montoj; sed nun ili estis malmultaj kaj malofte vidataj. Kiam ili aperis, ili kunportis sciigojn de malproksime, kaj rakontis forgesitajn historiojn, kiujn oni avide aŭskultis; sed la bri-homoj ne amikiĝis kun ili.

Troviĝis ankaŭ multaj hobitaj familioj en Brilando; kaj *ili* pretendis esti la plej malnova hobita loĝantaro en la mondo, kiu estis starigita longe antaŭ ol eĉ Brandovino estis transirita kaj la Provinco koloniita. Ili loĝis plejparte en Transio, kvankam troviĝis kelkaj en Brio mem, precipe sur la montdeklivoj, super la domoj de la homoj. La granduloj kaj la etuloj (kiel ili nomis unu la alian) rilatis amikece, zorgante pri propraj aferoj propramaniere, sed ambaŭ prave taksis sin kiel necesajn partojn de la bria popolo. Nenie aliloke en la mondo troveblis tiu aparta (sed bonega) aranĝo.

La bria popolo, Granda kaj Eta, mem ne vojaĝis multe; kaj la aferoj de

la kvar vilaĝoj ĉefe koncernis ilin. De tempo al tempo hobitoj de Brio iris ĝis Boklando, aŭ Orient-kvarono; sed malgraŭ tio, ke ilia eta tereno situis apenaŭ pli ol je unutaga rajdado oriente de la Brandovina Ponto, la hobitoj de l' Provinco jam malofte vizitis ĝin. Okaza boklandano aŭ aventurema Tjuko venis pasigi unu-du noktojn en la taverno, sed eĉ tio iĝis ĉiam pli malofta. La provincaj hobitoj nomis tiujn el Brio, kaj ĉiujn aliajn, kiuj loĝis aliflanke de la limoj, eksteruloj, kaj malmulte interesiĝis pri ili, taksante ilin malspritaj kaj krudaj. Probable multe pli da eksteruloj estis dislokitaj en la okcidento de la mondo en tiu epoko, ol imagis la popolo de la Provinco. Iuj, sendube, ne vivis pli bone ol vagabonde, pretaj fosi truon en iu ajn teramaso kaj resti nur tiel longe, kiel oportunis al ili. Sed almenaŭ en Brilando, la hobitoj estis decaj kaj bonstataj, kaj ne pli kamparanecaj ol la neproksimaj parencoj en la Provinco. Ne estis ankoraŭ forgesite, ke iam okazis multe da vojaĝado inter la Provinco kaj Brio. Troviĝis bria sango en la Brandobokoj, laŭfame.

En la vilaĝo Brio estis proksimume cent domoj de la granduloj, plejparte super la Vojo, kaŭrantaj sur la deklivoj kun fenestroj rigardantaj okcidenten. Tiuflanke, formante pli ol duoncirklon de la monteto kaj reen al ĝi, estis profunda fosaĵo kun densa dornbarilo inteme. Transiris ĝin la Vojo pere de digvojo; sed kie ĝi breĉis la dornbarilon, ĝin baris pordego. Alia pordego troviĝis ĉe la suda angulo, kie la Vojo eliris el la vilaĝo. La pordoj estis fermataj je noktiĝo; sed ĝuste interne de ili staris loĝejetoj por la pordistoj.

Sur la Vojo mem, kie ĝi turniĝis dekstren por ĉirkaŭiri la montetosubon, staris granda taverno. Ĝi estis konstruita antaŭlonge, kiam la trafiko sur la vojoj estis pli intensa. Brio situis ĉe malnova vojrenkontiĝo; alia antikva vojo transiris la Orientan Vojon ĝuste apud la fosaĵo ĉe la okcidenta fino de la vilaĝo, kaj en la antaŭaj epokoj homoj kaj aliuloj diversspecaj multe vojaĝis per ĝi. "Stranga kiel novaĵo el Brio", — ankoraŭ estis popolesprimo en Orient-kvarono, deveninta el tiu tempo, kiam novaĵoj el nordo, sudo kaj oriento estis aŭdeblaj en la taverno, kaj kiam la hobitoj de l' Provinco iris tien pli ofte por aŭskulti ilin. Sed la nordaj landoj estis jam delonge forlasitaj, kaj la Norda Vojo estis nun malofte uzata: ĝi estis herbokovrita, kaj la brianoj nomis ĝin Verdvojo.

Tamen la bria taverno estis ankoraŭ tie, kaj la posedanto estis persono grava. Lia domo estis renkontejo por la pigraj, parolemaj, kaj scivolemaj loĝantoj, grandaj kaj etaj, de la kvar vilaĝoj; kaj kunvenejo de disiruloj kaj aliaj vagantoj, kaj de tiaj vojaĝantoj (plejparte gnomoj), kiaj daŭre iris laŭ la Orienta Vojo, al kaj de la montoj.

Estis mallume, kaj brilis blankaj steloj, kiam Frodo kaj liaj kunuloj venis finfine al la verdvoja transirejo kaj proksimiĝis al la vilaĝo. Ili alvenis al la

okcidenta pordo kaj trovis ĝin fermita, sed antaŭ la pordo de la loĝejo aliflanke sidis homo. Li saltstariĝis kaj alportis lampon kaj rigardis ilin tra la pordego surprizite.

— Kion vi volas, kaj de kie vi venis? — Li demandis malafable.

— Ni celas la tavernon ĉi tie, — respondis Frodo. — Ni vojaĝas orienten kaj ne povas pluiri hodiaŭ vespere.

— Hobitoj! Kvar hobitoj! Kaj cetere, el la Provinco laŭ la parolmaniero, — diris la pordisto mallaŭte, kvazaŭ parolante al si. Li fikse rigardis ilin dum momento mishumore, poste malfermis malrapide la pordegon kaj lasis, ke ili trarajdu.

— Ni malofte vidas provincanojn rajdi nokte laŭ la Vojo, — li daŭrigis, kiam ili haltis momente antaŭ lia pordo. — Pardonu mian scivolon pri la afero, kiu kondukas vin orienten de Brio! Kiel vi nomiĝas, se mi rajtas?

— Niaj nomoj kaj niaj aferoj apartenas al ni, kaj tiu ĉi loko ne ŝajnas oportuna por pridiskutado, — diris Frodo, al kiu ne plaĉis la aspekto de la viro nek lia voĉtono.

— Viaj aferoj apartenas al vi, sendube, — diris la viro, — sed mia afero estas starigi demandojn post la noktiĝo.

— Ni estas hobitoj el Boklando, kaj ni emas vojaĝi kaj ripozi en la taverno ĉi tie, — enmetis Gaja. — Mi estas s-ro Brandoboko. Ĉu tio sufiĉas al vi? La brianoj antaŭe estis ĝentilaj al vojaĝantoj, aŭ tiel mi aŭdis.

— Bone, bone! — diris la viro. — Mi ne intencis ofendi. Sed vi eble trovos, ke pli da homoj ol malĵuna Henĉjo ĉe la pordo starigos al vi demandojn. Estas stranguloj en la ĉirkaŭaĵo. Se vi pluiros ĝis *La Poneo*, vi trovos, ke vi ne estas la solaj gastoj.

Li deziris al ili bonan nokton, kaj oni diris nenion pli; sed Frodo povis vidi per la lampolumo, ke la viro plu rigardas ilin scivoleme. Li estis kontenta aŭdi la bruon de la pordofermo malantaŭ ili, kiam ili rajdis antaŭen.

Li scivolis, kial la viro estas tiel suspektema, kaj ĉu iu jam petis novaĵon pri grupo da hobitoj. Ĉu eble Gandalfo? Li eble alvenis, dum ili estis malhelpataj en la Arbaro kaj sur la Montetaro. Sed io en la mieno kaj la voĉo de la pordisto maltrankviligis lin.

La viro momente postrigardis la hobitojn, kaj poste reeniris sian domon. Tuj kiam li turnis la dorson, malhela figuro enrampis rapide trans la pordegon kaj forvaporiĝis en la ombrojn de l' vilaĝa strato.

La hobitoj rajdis antaŭen laŭ apika vojo, pasante kelkajn unuopajn domojn, kaj haltis antaŭ la taverno. La domoj aspektis al ili grandaj kaj strangaj. Sam rigardis supren al la taverno kaj ĝiaj tri etaĝoj kaj multaj fenestroj, kaj sentis malbraviĝon en la koro. Li estis imaginta, ke li

renkontos gigantojn pli altajn ol arboj, kaj aliajn kreaĵojn eĉ pli timigajn, iam dum la daŭro de la vojaĝo; sed tiumomente la unua ekvido de la Homoj pli ol sufiĉis al li, efektive tro imponis ĉe la malluma fino de laciga tago. Li bildigis al si nigrajn ĉevalojn starantajn selite en la ombroj de l' taverna korto, kaj Nigrajn Rajdantojn gvatantajn tra mallumaj supraj fenestroj.

— Ni vere ne intencas pasigi ĉi tie la nokton, ĉu, sinjoro? — li ekkriis. — Se loĝas hobit-uloj en tiu ĉi loko, kial ni ne serĉu iujn, kiuj volonte bonvenigus nin? Estus pli hejmece.

— Kio misas pri la taverno? — diris Frodo. — Tom Bombadiljo rekomendis ĝin. Supozeble ĝi estas sufiĉe hejmeca interne.

Eĉ ekstere la taverno aspektis al konantaj okuloj agrabla domo. Ĝi frontis al la Vojo, kaj havis du alojn malantaŭen konstruitajn sur tero parte elfosita el la subaj deklivoj de la monteto, tiel ke malantaŭe fenestroj de la dua etaĝo nivelis kun la tero. Larĝa arkaĵo kondukis al korto inter la du aloj, kaj maldekstre sub la arkaĵo estis granda pordo atingebla per kelkaj larĝaj ŝtupoj. La pordo estis malfermita, kaj lumo eliĝis tra ĝi. Super la arkaĵo estis lampo, kaj sube svingiĝis granda afiŝtabulo: grasa blanka poneo baŭmis sur la malantaŭaj kruroj. Super la pordo estis pentrita per blankaj literoj: LA PRANCA PONEO de BARLIMANO BUTERBURO. Multaj el la teretaĝaj fenestroj montris lumojn malantaŭ dikaj kurtenoj.

Dum ili hezitis ekstere en la malhelo, iu interne komencis kanti gajan kanton, kaj multaj bonhumoraj voĉoj aliĝis laŭte al la refreno.

Ili aŭskultis momente tiun kuraĝigan sonon kaj poste elseliĝis. La kanto finiĝis kaj aŭdiĝis eksplodo de ridoj kaj aplaŭdoj.

Ili kondukis siajn ponejojn sub la arkaĵon, kaj lasinte ilin en la korto ili supreniris la ŝtuparon. Frodo iris antaŭen kaj preskaŭ karambolis kun malalta grasulo kun kalva kapo kaj ruĝa vizaĝo. Li vestis blankan antaŭtukon kaj estis rapidanta tra unu pordo en alian, portante pleton ŝarĝitan de plenaj kruĉoj.

— Ĉu ni... — komencis Frodo.

— Momenton, mi petas! — kriis la viro trans la ŝultron, kaj malaperis en tumulton de voĉoj kaj fumonubo. Post momento li reaperis, viŝante la manojn per la antaŭtuko.

— Bonan vesperon, mastreto! — li diris kliniĝante. — Kion vi deziras?

— Litojn por kvar kaj stalojn por kvin ponejoj, se tion oni povas havigi. Ĉu vi estas s-ro Buterburo?

— Ĝuste! Barlimano estas mia nomo. Barlimano Buterburo, servoprete! Vi devenas de la Provinco, ĉu ne? — li diris, kaj poste li subite klakigis sian manon sur la frunto, kvazaŭ klopodante memori ion. — Hobitoj! — li kriis. — Nu, pri kio tio memorigas min? Ĉu mi rajtas peti viajn nomojn, sinjoro?

— S-ro Tjuko kaj s-ro Brandoboko, — diris Frodo, — kaj jen Sam Vato. Mia nomo estas Submonteto.

— Jen do! — diris s-ro Buterburo, klakante per la fingroj. — Denove tio foriris! Sed tio revenos, kiam mi disponos tempon por pripensi. Mi estas trookupata; sed mi vidos, kion mi povos aranĝi por vi. Ni malofte ricevas grupon el la Provinco nuntempe, kaj mi bedaŭrus, se mi ne bonvenigus vin. Sed tioma klientaro jam troviĝas en la domo hodiaŭ vespere, kioma ne estis jam de sufiĉe longe. Kiam pluvas, tiam inundas, ni diras en Brio.

— Hej! Nobo! — li kriis. — Kie vi troviĝas, vi lanpieda lantulo? Nobo!

— Venas, sinjoro! Venas! — Gajaspekta hobito elpuŝiĝis tra pordo, kaj, rimarkante la vojaĝintojn, haltis abrupte kaj rigardis ilin tre interesite.

— Kie Bobo? — demandis la tavernestro. — Vi ne scias? Do trovu lin! Rapidege! Mi ne havas ses krurojn, ankaŭ ne ses okulojn! Diru al Bobo, ke kvin poneoj devas esti enstaligitaj. Iel li devas trovi lokon. — Nobo fortrotis rikanante kaj palpebrumante.

— Nun ja, kion mi estis dironta? — diris s-ro Buterburo, frapetante sian frunton. — Unu afero elpelas alian, por tiel diri. Mi estas tiel okupata hodiaŭ vespere, ke mia kapo kirliĝas. Troviĝas grupo, kiu hieraŭ vespere venis laŭ la Verdvojo el la sudo — kaj tio estis jam sufiĉe stranga komenciĝo. Ankaŭ troviĝas vojaĝanta grupo da gnomoj irantaj okcidenten, kiu alvenis hodiaŭ vespere. Kaj nun jen vi. Se vi ne estus hobitoj, estus dubinde ke ni povus vin endomigi. Sed ni havas unu-du ĉambrojn en la norda alo, kiuj estis konstruitaj speciale por hobitoj, kiam oni starigis tiun ĉi domon. Sur la teretaĝo, kiel ili plejofte preferas, kun rondaj fenestroj, kiel plaĉas al ili. Mi esperas, ke vi estos komfortaj. Vi deziros vespermanĝon, sendube. Laŭeble baldaŭ. Venu ĉi tien!

Li kondukis ilin mallonge tra koridoro kaj malfermis pordon.

— Jen agrabla saloneto! — li diris. — Espereble ĝi taŭgos. Nun pardonu min. Mi estas tiel okupata. Mankas tempo por paroli. Mi devas fortroti. Estas dura laboro por du kruroj, sed mi ne malgrasiĝas. Mi enrigardos denove poste. Se vi deziras ion, sonorigu la mansonorilon, kaj Nobo venos. Se li ne venos, sonorigu kaj kriu!

Finfine li foriris, kaj lasis ilin iom spiromankaj. Li ŝajnis kapabla paroladi senfine, kiom ajn li estus okupata. Ili trovis sin en eta kaj agrable varma ĉambro. Iom da hela fajro brulis en la kameno, kaj antaŭ ĝi estis kelkaj malaltaj kaj komfortaj seĝoj. Staris ronda tablo, kun jam sursternita tuko blanka, kaj sur ĝi estis granda mansonorilo. Sed Nobo, la hobita servisto, enpafis sin postnelonge, antaŭ ol venis al ili en la kapon sonorigi. Li alportis kandelojn kaj pleton ŝarĝitan je vazoj.

— Ĉu vi deziras ion trinki, mastroj? — li demandis. — Kaj ĉu mi

montru al vi la dormoĉambrojn, dum la vespermanĝo estas preparata?

Ili jam lavis sin kaj trinkis bieron el bonaj tasegoj, kiam revenis s-ro Buterburo kaj Nobo. Senprokraste la tablo estis ŝarĝita. Troviĝis varma supo, malvarmaj viandoj, rubusa torto, novaj panoj, butertranĉoj, kaj duono de matura fromaĝo: bona senpretenda manĝaĵo, same bona kiel en la Provinco, kaj sufiĉe hejmeca por forpeli la lastajn dubojn de Sam (jam multe senzorgigita pro la bonega biero).

La tavernestro ŝvebis dum kelka tempo, kaj poste pretiĝis forlasi ilin.

— Mi ne scias, ĉu eble vi emos aliĝi al la societo, kiam vi finmanĝos, — li diris, starante ĉe la pordo. — Eble vi preferos enlitiĝi. Tamen la societo tre volonte bonvenigos vin, se vi emas. Al ni ne ofte venas eksteruloj — vojaĝantoj el la Provinco, mi devas diri, pardonpete; kaj al ni plaĉas aŭdi iomete da novaĵo, aŭ iun rakonton aŭ kanton, kiun vi havas en la menso. Sed laŭ via deziro! Sonorigu, se io mankos al vi!

Tiel freŝigitaj kaj kuraĝigitaj ili sentis sin post fino de la manĝado (ĉirkaŭ tri kvaronojn da horo de seninterrompa glutado ne malhelpata de nenecesaj paroloj), ke Frodo, Grinĉjo kaj Sam decidis aliĝi al la societo. Gaja diris, ke tie estos tro sufoke.

— Mi sidos ĉi tie kviete antaŭ la fajro dum kelka tempo, kaj eble eliros poste por spiri iom da aero. Kondutu bone kaj ne forgesu, ke via celo estas eskapi sekrete, kaj ni troviĝas ankoraŭ sur la ĉefvojo kaj ne tre malproksime de la Provinco!

— En ordo! — diris Grinĉjo. — Gardu vin! Ne perdiĝu, kaj ne forgesu, ke estas pli sekure en la domo!

La societo estis en la komuna salono de la taverno. La ĉeestantaro estis multnombra kaj varia, kiel Frodo rimarkis, kiam liaj okuloj kutimiĝis al la lumo. Tiu devenis ĉefe de flamanta ŝtipfajro, ĉar la tri lampoj pendantaj de la traboj estis etbrilaj kaj duone vualitaj per fumo. Barlimano Buterburo staris proksime al la fajrujo, parolante al duo da gnomoj kaj unu-du strangaspektaj homoj. Sur la benkoj sidis diversaj uloj: homoj de Brio, grupo de lokaj hobitoj (sidantaj babile kune), kelkaj pliaj gnomoj, kaj aliaj svagaj figuroj malfacile videblaj en la foraj ombroj kaj anguloj.

Tuj kiam eniris la provincaj hobitoj, aŭdiĝis bonveniga alvokado de la brianoj. La fremduloj, precipe tiuj, kiuj alvenis laŭ la Verdvojo, rigardis ilin scivoleme. La tavernestro prezentis la novevenintojn al la brianoj, tiel rapide, ke, kvankam ili aŭdis multajn nomojn, ili malofte certis, kiuj estas la nomitoj. La homoj de Brio ŝajnis ĉiuj havi nomojn iom botanikajn (kaj por la provincanoj iom strangajn), kiel Junkolumo, Kaprofolio, Erikpiedo, Pomodoro, Kardolano kaj Filikĉjo (se ne mencii Buterburon). Kelkaj el la hobitoj havis nomojn similspecajn. La Artemizioj, ekzemple, ŝajnis

multnombraj. Sed la plimultaj havis naturajn nomojn, kiel Teramaso, Brokhuso, Longatruo, Sablopelo, kaj Tunelĉjo, el kiuj multaj estis uzataj en la Provinco. Estis kelkaj Submontetoj el Transio, kaj ĉar ili ne povis imagi samnomon sen parenceco, ili prenis Frodon al la koro kiel longeperditan kuzon.

La briaj hobitoj, fakte, estis amikemaj kaj scivolemaj, kaj Frodo baldaŭ trovis, ke estos necese iel klarigi tion, kion li faras. Li sciigis, ke li interesiĝas pri historio kaj geografio (pro kio okazis multe da kapskuado, kvankam neniu el ambaŭ vortoj estis multe uzata en la bria dialekto). Li diris, ke li pripensas verkadon de libro (je kio okazis silenta mirado) kaj ke li kaj liaj amikoj deziras kolekti informojn pri hobitoj loĝantaj ekster la Provinco, precipe en la landoj orientaj.

Je tio eksplodis ĥaoso de voĉoj. Se Frodo vere dezirus verki libron kaj havus multajn orelojn, li estus lerninta sufiĉon por pluraj ĉapitroj dum kelkaj minutoj. Kaj se tio ne estis sufiĉa, al li estis donita tuta listo de nomoj, komence de “jena maljuna Barlimano”, al kiuj li povus iri por pluaj informoj. Sed post kelka tempo, ĉar Frodo ne evidentigis signon, ke li verkos libron en tiu loko, la hobitoj reiris al siaj demandoj pri okazaĵoj en la Provinco. Frodo ne pruviĝis tre komunikema, kaj li baldaŭ trovis sin sidanta sola en angulo, aŭskultanta kaj ĉirkaŭrigardanta.

La homoj kaj gnomoj parolis plejparte pri malproksimaj eventoj kaj diskonigis novaĵojn, kiaj estiĝis eĉ tro konataj. En la sudo estis perturboj, kaj evidentiĝis, kelahomoj, kiuj venis laŭ la Verdvojo, estis nomadaj, serĉante landojn, kie ili povos trovi iom da trankvilo. La brianoj estis kunsentemaj, sed klare ne tre pretis akcepti grandan nombron da fremduloj en sia landeto. Unu el la vojaĝintoj, straba mistrajta ulo, antaŭdiris, ke pli da homoj venos norden en la baldaŭa estonteco.

— Se oni ne trovos por ili lokon, ili mem trovos por si. Ili rajtas vivi, samkiel aliuloj, — li diris laŭte. La lokaj loĝantoj ne aspektis tro kontentaj pri la ebleco.

La hobitoj ne multe atentis ĉion ĉi, kaj ĝi tiumomente ne ŝajnis multe koncerni hobitojn. Granduloj apenaŭ volus peti loĝadon en hobitaj truoj. Ili pli interesiĝis pri Sam kaj Grinĉjo, kiuj jam sentis sin tute hejme kaj babilis gaje pri okazaĵoj en la Provinco. Grinĉjo vekis multe da ridado per priskribo pri kolapso de la tegmento de l’ Urba Truo en Mult-Fosejo: Vilĉjo Vitfuto, la Urbestro, kaj la plej grasa hobito en Okcident-kvarono, estis entombigita en kalko, kaj elvenis kvazaŭ faranita pudingo. Sed kelkaj demandoj iom maltrankviligis Frodon. Unu el la brianoj, kiu verŝajne estis plurfoje en la Provinco, volis scii, kie vivas la Submontetoj kaj al kiuj ili estas parencaj.

Subite Frodo rimarkis, ke ankaŭ strangaspekta veterhardita viro, kiu

sidis en ombroj apudmuraj, streĉe aŭskultis la hobitajn parolojn. Antaŭ si li havis altan pokalon, kaj li fumis longtuban pipon nekutime ĉizitan. Liaj kruroj etendiĝis antaŭen, vidigante longajn botojn el fleksiĝema ledo, kiuj bone laŭmezuris sed spertis multe da uzado kaj estis aktuale kototegitaj. Vojaĝe makulita mantelo el peza malhelverda drapo estis strikte volvita ĉirkaŭ li, kaj malgraŭ la ĉambra varmego li portis kapuĉon, kiu superombris lian vizaĝon; sed ekbrilo de liaj okuloj videbliĝis dum li rigardis la hobitojn.

— Kiu estas tiu? — Frodo demandis, kiam li havis okazon flustri al s-ro Buterburo. — ŝajnas, ke vi ne prezentis lin?

— Tiu? — diris la tavernestro per responda flustro, larĝigante unu okulon sen turno de la kapo. — Mi ne scias precize. Li estas unu el la vagularo — ni nomas ilin disiruloj. Li malofte parolas: tamen li bonege rakontas, kiam li emas al tio. Li malaperas dum monato, dum jaro, kaj poste li reaperas. Li venis-iris sufiĉe ofte dum la pasinta printempo; sed mi ne rimarkis lin lastatempe en la ĉirkaŭaĵo. Kio estas lia ĝusta nomo, tion mi neniam aŭdis: sed ĉi tie oni konas lin laŭ Paŝegulo. Li iras tre rapide per siaj longaj tibioj; tamen al neniu diras, kiamotive li devas rapidi. Sed ne klarigeblas oriento kaj okcidento, kiel ni diras en Brio, kio estas la disiruloj kaj la provincanoj, pardonpete. Strange, ke vi enketis pri li. — Sed tiumomente s-ro Buterburo estis forvokita per postulo de plua biero kaj lia lasta komento restis neklarigita.

Frodo trovis, ke Paŝegulo nun rigardas lin, kvazaŭ li aŭdus aŭ divenus ĉion diritan. Baldaŭ per mangesto kaj kapklino li invitis Frodon alveni kaj sidiĝi apude. Kiam Frodo alproksimiĝis, li forpuŝis sian kapuĉon, vidigante vilan malhelan hararon grizmakulitan, kaj sur pala severa vizaĝo paron de akraj grizaj okuloj.

— Mi nomiĝas Paŝegulo, — li diris mallaŭtvoĉe. — Mi tre ĝojas vin renkonti, Mastro Submonteto, se maljuna Buterburo pravis pri via nomo.

— Li pravis, — diris Frodo rigide. Li sentis sin tre malserena rigardate de tiuj akraj okuloj.

— Nu, Mastro Submonteto, — diris Paŝegulo, — sur via loko, mi malhelpus, ke viaj junaj amikoj tro multe parolu. Trinkaĵoj, fajro, kaj hazardaj renkontiĝoj sufiĉe agrablas, sed, nu — ĉi tie ne estas la Provinco. Ĉeestas strangaj personoj. Kvankam ne mi devus diri tion, vi eble pensas, — li aldonis kun memkonscia rideto, vidante ekrigardon de Frodo. — Kaj eĉ pli strangaj vojaĝantoj trapasis Brion lastatempe, — li daŭrigis, rigardante la vizaĝon de Frodo.

Frodo rerigardis sed diris nenion; kaj Paŝegulo montris neniun pluan signon. Lia atento ŝajne fiksiĝis al Grinĉjo. Alarmite, Frodo konsciiĝis, ke la ridinda juna Tjuko, kuraĝigite per la sukceso pri la urbestro de Mult-Fosejo,

efektive nun rakontis komike pri la adiaŭa festo de Bilbo. Li jam prezentis imiton de la Parolado, kaj proksimiĝas al la miriga Malapero.

Frodo iĝis kolereta. Tio estis rakonto sufiĉe sendanĝera por la plimultaj lokaj hobitoj, sendube: nur komika rakonto pri tiuj komikuloj trans la Rivero; sed kelkaj (ekzemple maljuna Buterburo) havis iom da scio, kaj probable jam delonge aŭdis onidirojn pri la malapero de Bilbo. Ĝi enmensigus al ili la nomon Baginzo, precipe se jam okazis enketoj en Brio rilate tiun nomon.

Frodo nervoziĝis, pensante kion fari. Grinĉjo evidente multe ĝuis la ricevatan atenton, kaj tute forgesis pri ilia danĝero. Frodo subite ektimis, ke en lia nuna humoro li eble eĉ la Ringon mencius; kaj tio tre povus esti katastrofa.

— Prefere faru ion rapide! — flustris Paŝegulo en lian orelon. Frodo saltstariĝis sur tablon, kaj komencis paroli. La atento de la aŭskultantoj de Grinĉjo estis perturbita. Iuj hobitoj rigardis Frodon, ridis kaj aplaŭdis, pensante, ke s-ro Submonteto jam glutis iom pli ol sufiĉe da biero.

Frodo subite embarasiĝis, kaj trovis, ke (laŭ sia kutimo kiam li faris paroladon) li fingrumas la enhavon de sia poŝo. Li palpis la Ringon sur ĝia ĉeno, kaj tute neklarigeble lin inundis deziro ĝin surmeti kaj malaperi el la stulta situacio. Al li ŝajnis, iel, ke tiu propono alvenis al li de ekstere, de iu aŭ io en la ĉambro. Li firme rezistis la tenton, kaj kroĉis la Ringon en sia mano, kvazaŭ tenegi ĝin kaj malhelpi ĝian eskapon aŭ misfaradon. Ĉiuokaze ĝi havigis al li neniom da inspiro. Li prononcis "kelkajn konvenajn vortojn", kiel oni dirus en la Provinco:

— Ni estas ĉiuj tre plezurigitaj de la afableco de via akcepto, kaj mi aŭdacas esperi, ke mia mallonga vizito helpos renovigi la amikecajn rilatojn inter la Provinco kaj Brio; — kaj poste li hezitis kaj tusis.

Ĉiu en la ĉambro jam rigardis lin.

— Kanton! — kriis unu el la hobitoj.

— Kanton! Kanton! — kriis ĉiuj aliaj. — Ek al, mastro, kantu al ni ion, kiun ni neniam antaŭe aŭdis!

Dum momento Frodo staris gapante. Tiam despere li komencis ridindan kanton, kiu estis iom plaĉinta al Bilbo (kaj pri kiu li iom fieris, ĉar la vortojn li mem verkis). Temis pri taverno; kaj tial probable ĝi venis al Frodo en la kapon ĝuste tiam. Jen la plena teksto. Nur kelkaj vortoj el ĝi estas nuntempe kutime memorataj.

Troviĝis foje olda, griza
tavern' montetofunde,
kaj tian bieron oni vendis,
ke l' Luna Viro mem descendis

por trinki ĝin abunde.

La ĉevalista kat' posedis
kvinkordan violonon;
kaj supren-suben l' arĉo kuris,
jen grincis alte, jen murmuris,
jen segis mezan sonon.

Hundeto de la estro ŝatis
spritaĵojn kun admiro;
kiam la gasta gajo multis,
al ĉiuj ŝercoj ĝi aŭskultis
kaj ridis ĝis senspiro.

Bovin' ilia kornohava
fieris kun superbo;
sed ebriigis ĝin muziko
ĝis kun flirtiga vostotiko
ĝi dancis sur la herbo.

Arĝentaj pletoj kaj kuleroj
valoris preterpreze!
du specialis dum Dimanĉo,
jam poluritaj laŭ aranĝo
Sabaton posttagmeze.

La Luna Viro trinkis ege,
la katmiaŭo strasis;
kuler' kaj plet' surtable dancis,
bovino en ĝardeno prancis,
la hund' la voston ĉasis.

La Luna Viro pluan glutis
kaj de la seĝ' forglisis,
kaj sonĝis planke pri la elo,
ĝis steloj palis sur ĉielo
kaj la aŭror' kulisis.

Al kat' la ĉevalisto diris:
"Ĉevaloj de la Luno
henas kaj la buŝferon mordas,
la mastra menso tre malordas
kaj soros baldaŭ Suno!"

Do violone ludis sprone

la kat’ kun laŭto plia;
per ĝigo vekis ĝi inspiron,
dum l’ estro skuis la Lunan Viron,
dirante: “Post la tria!”

La Viron oni rulis supren
ĝis ree li surlunis,
dum la ĉevaloj karakolis,
kaj la bovino kapriolis,
kaj plet’ kuleron kunis.

De l’ violono laŭtiĝis sono,
la hund’ blekegis flanke;
jen la bovino renversiĝis;
la gastoj el la lit’ verŝiĝis
kaj dancis jam surplanke.

Rompiĝis kordoj violonaj,
bovin’ translunis muĝe,
pro l’ spritoj ridis la hundeto,
forkuris kun Sabata pleto
kuler’ Dimanĉa fuĝe.

La Lun’ ruliĝis postmonteten
kiam la Sun’ suprenis.
Ĝi ion tiam ne imagis,
ĉar ili ĉiuj, kvankam tagis,
al sia lit’ revenis!

Aŭdiĝis longaj laŭtaj aplaŭdoj. Frodo posedis bonan voĉon, kaj la kanto ekplaĉis al ili.

— Kie estas maljuna Barlo? — ili kriis. — Tion li devus aŭdi. Bobo devus lernigi al sia kato la violonon, kaj poste ni povus danci. — Ili postulis pli da biero, kaj komencis krii: — Kantu ĝin denove, mastro! Ek! Bis!

Ili trudis al Frodo alian trinkaĵon, kaj devigis lin rekomenci la kanton, dum multaj el ili kunkantis; ĉar la melodio estis tre konata, kaj ili rapide parkeris tekstojn. Nun estis la vico de Frodo esti kontenta pri si. Li kapriolis sur la tablo; kaj kiam li la duan fojon venis ĝis “bovin’ translunis muĝe”, li saltis en la aeron. Multe tro vigle; ĉar li descendis, krak! sur pleton kovritan de kruĉoj, kaj glitis, kaj ruliĝis de la tablo kun krako, tintoj kaj bum! Ĉiuj aŭdantoj malfermis la buŝojn por ridi kaj ĉesis en gapa silento, ĉar la kantinto malaperis. Li simple malestis, kvazaŭ li trairus tute tra l’ planko, ne postlasinte truon!

La lokaj hobitoj gapis mirigite, kaj poste saltstariĝis kaj kriis por alvoki Barlimanon. La tuta societo formoviĝis de Grinĉjo kaj Sam, kiuj trovis sin solaj en angulo, kaj rigardataj malhele kaj dubeme de fore. Estis klare, ke multaj personoj jam taksis ilin kunuloj de vojaĝanta magiisto kun nekonataj potencoj kaj celoj. Sed ĉeestis unu brunhaŭta brilandano, kiu staris ilin rigardante kun esprimo scioplena kaj duone moka, kiu tre malserenigis ilin. Baldaŭ li glite eliris tra la pordo, sekvate de la straba sudano: tiuj du estis multe interflustrintaj dum la vespero. Henĉjo la pordisto ankaŭ eliris tuj post ili.

Frodo sentis sin stultulo. Ne sciante, kion alian fari, li forrampis sub la tabloj al la malhela angulo apud Paŝegulo, kiu sidis senemocie, donante neniun signon pri siaj pensoj. Frodo apogis sin al la muro kaj formetis la Ringon. Kiel ĝi suriris lian fingron, li tute ne sciis. Li povis supozi nur, ke li palpis ĝin en la poŝo dum li kantis, kaj ke iel ĝi surglitis, kiam li abrupte elpuŝis la manon por sin savi dum la falo. Momente li scivolis, ĉu eble la Ringo mem trompis lin; eble ĝi klopodis riveli sin responde al iu deziro aŭ ordono, kiu senteblis en la ĉambro. Al li ne plaĉis la aspekto de la viroj, kiuj jam eliris el la ĉambro.

— Nu? — diris Paŝegulo, kiam li revidiĝis. — Kial vi faris tion? Pli malbone ol io ajn direbla de viaj amikoj! Vi enkaĉigis la piedon. Aŭ ĉu prefere la fingron?

— Mi ne scias, kion vi celas, — diris Frodo, ĝenite kaj timigite.

— Jes, vi ja scias, — respondis Paŝegulo, — sed ni prefere atendu ĝis trankviliĝos la tumulto. Poste, se plaĉos al vi, s-ro *Baginzo*, mi deziros kvietan interparolon kun vi.

— Pri kio? — demandis Frodo, ignorante la subitan uzon de sia ĝusta nomo.

— Afero iom grava — al ni ambaŭ, — respondis Paŝegulo, rigardante rekte en la okulojn de Frodo. — Vi eble aŭdos ion por vi avantaĝan.

— Do bone, — diris Frodo, klopodante aspekti senĝena. — Mi parolos kun vi poste.

Dume apud la kameno okazis diskuto. S-ro Buterburo entrotis, kaj li nun klopodis aŭskulti diversajn kontraŭdirajn historiojn de la okazaĵo samtempe.

— Mi vidis lin, s-ro Buterburo, — diris hobito; — aŭ almenaŭ mi ne vidis lin, se vi min komprenas. Li simple malaperis senpostlase, por tiel diri.

— Ĉu vere, s-ro Artemizio! — diris la tavernisto, mienante perplekson.

— Jes, vere! — respondis Artemizio. — Cetere, mi diris, kion mi volis diri.

— Enestas eraro ie, — diris Buterburo, skuante la kapon. — Ekzistis tro multe da tiu s-ro Submonteto, ke li malaperu senpostlase; aŭ kunpostlase,

kiel ŝajnas pli probabla en tiu ĉi densaera ĉambro.

— Nu, kie li estas nun? — kriis pluraj voĉoj.

— Ĉu mi scias? Li rajtas iri kien li volas, kondiĉe ke li pagu matene. Jen do s-ro Tjuko: li ne malaperis.

— Nu, mi vidis, kion mi vidis, kaj mi vidis, kion mi ne vidis, — diris Artemizio obstine.

— Kaj diras mi, ke enestas ia eraro, — ripetis Buterburo, prenante la pleton kaj surigante la frakasitajn kruĉojn.

— Kompreneble enestas eraro! — diris Frodo. — Mi ne malaperis. Jen mi! Mi nur interŝanĝis kelkajn vortojn kun Paŝegulo en la angulo.

Li antaŭenpaŝis en la fajrolumon, sed la plejparto de la societo retretis, eĉ pli perturbite ol antaŭe. Ili tute ne estis kontentigitaj per lia klarigo, ke li rapide forrampis sub la tabloj post la falo. La plimultaj hobitoj kaj la homoj de Brio senprokraste foriris ofendite, ne havante emon al plua distriĝo tiuvespere. Unu-duĵetis al Frodo rigardon nigran kaj foriris murmurante inter si. La gnomoj kaj du aŭ tri fremdaj homoj, kiuj plu estis, stariĝis kaj deziris bonan nokton al la tavernestro, sed ne al Frodo kaj ties amikoj. Post nelonge restis neniu krom Paŝegulo, kiu daŭre sidadis, nerimarkite, apud la muro.

S-ro Buterburo ne ŝajnis multe perturbita. Li kalkulis, tre probable, ke lia domo estos denove plena dum multaj estontaj vesperoj, ĝis la aktuala mistero estus plendiskutita.

— Nu, kion vi faris, s-ro Submonteto? — li demandis. — Timigis miajn klientojn kaj frakasis mian vazaron per via gimnastikado!

— Mi tre bedaŭras, ke mi tiel ĝenis, — diris Frodo. — Estis tute senintence, kredu min. Plej misfortuna akcidento.

— En ordo, s-ro Submonteto! Sed se vi intencas denove iom akrobati aŭ prestidigiti, aŭ kio ajn estis, prefere avertu la personaron antaŭe — kaj avertu *min*. Ni estas ĉi tie iom suspektemaj pri ĉio eksterordinara — mistera, se vi min komprenas; kaj ni ne simpatias subite tion.

— Nenion similan mi denove faros, s-ro Buterburo, mi promesas tion. Kaj nun mi verŝajne enlitiĝos. Ni ekiros frue en la mateno. Ĉu vi certigos, ke niaj poneoj estos pretaj ĝis la oka horo?

— Tre bone! Sed antaŭ ol vi foriros, mi ŝatus interparoli kun vi private, s-ro Submonteto. Io ĵus revenis al mia menso, kion mi devus sciigi al vi. Espereble vi ne misakceptos ĝin. Kiam mi plenumos unu-du aferojn, mi venos al via ĉambro, se vi konsentas.

— Certe! — diris Frodo, sed lia koro peziĝis. Li scivolis, kiom da privataj interparoloj li spertos antaŭ ol enlitiĝi, kaj kion ili rivelos. Ĉu ĉiuj tiuj personoj estas ligitaj kontraŭ lin? Li komencis suspekti, ke eĉ la grasa

vizaĝo de maljuna Buterburo kaŝas minacajn planojn.

10

Paŝegulo

Frodo, Grinĉjo kaj Sam reiris al la saloneto. Mankis lumo. Gaja ne estis tie, kaj la fajro malardiĝis. Nur reflamiginte balge la cindrojn kaj surĵetinte unu-du ŝtipojn ili eltrovis, ke Paŝegulo estis akompaninta ilin. Jen li sidis trankvile sur seĝo apud la pordo!

— Nu do! — diris Grinĉjo. — Kiu estas vi, kaj kion vi deziras?

— Mi nomiĝas Paŝegulo, — li respondis, — kaj via amiko eble forgesis, ke li promesis kvietan interparolon kun mi.

— Vi diris, ke mi eble aŭdos ion por mi avantaĝan, ŝajnas al mi, — diris Frodo. — Kion vi volas diri?

— Plurajn aferojn, — respondis Paŝegulo. — Sed kompreneble, mi postulos mian pagon.

— Kion signifas tio? — demandis Frodo akre.

— Ne timu! Mi celas ĝuste jenon: Mi diros al vi mian sciaĵon, kaj donos al vi bonan konsilon — sed mi postulos rekompencon.

— Kaj tio estos kia, mi petas? — diris Frodo. Li suspektis, ke li kontaktiĝis kun fripono, kaj li pensis malserene, ke li kunportis nur malmulte da mono. La tuto apenaŭ kontentigus friponon, kaj li ne povis malhavi eĉ parton da ĝi.

— Ne pli ol vi kapablos pagi, — respondis Paŝegulo kun malrapida rideto, kvazaŭ li divenus la pensojn de Frodo. — Nur jenon: vi devos permesi, ke mi akompanu vin, ĝis mi deziros forlasi vin.

— Ĉu vere? — respondis Frodo, surprizite, sed ne multe malŝarĝite. — Eĉ se mi dezirus alian kunulon, mi ne konsentus al tia aranĝo, ĝis mi scius pli multe pri vi kaj viaj aferoj.

— Bonege! — ekkriis Paŝegulo, transigante siajn krurojn kaj komforte reklinigante. — ŝajne vi resaĝiĝas, kaj tio estas bona afero. Ĝis nun vi estis tro senzorga. En ordo! Mi diros al vi mian sciaĵon, kaj lasos al vi decidi pri la rekompenco. Vi eble volonte ĝin donos, aŭdinte min.

— Do, ek! — diris Frodo. — Kion vi scias?

— Tro multe; tro multajn ombrajn aferojn, — diris Paŝegulo seriozege. — Sed kiom koncernas vin... — Li stariĝis kaj aliris la pordon, malfermis ĝin abrupte kaj trarigardis. Poste li fermis ĝin kviete kaj residiĝis. — Mi havas akrajn orelojn, — li daŭrigis, mallevante la voĉon, — kaj kvankam mi

ne kapablas malaperi, mi ĉasis multajn sovaĝaĵojn kaj singardaĵojn, kaj mi kutime evitas vidiĝon, se mi volas. Nu, mi estis ĉi-vespere malantaŭ la dornbarilo sur la Vojo okcidente de Brio, kiam kvar hobitoj alvenis el la Montetaro. Ne necesas ripeti ĉion, kion ili diris al olda Bombadiljo aŭ unu al alia, sed unu afero interesis min. “Bonvolu memori, — diris unu el ili, — ke la nomo Baginzo devas *ne* menciiĝi. Mi estas s-ro Submonteto, se nomo estos mencienda”. Tiom interesis min tio, ke mi sekvis ilin ĉi tien. Mi transglitis la pordon ĝuste malantaŭ ili. Eble s-ro Baginzo havas honestan kialon por kaŝi sian nomon; sed se jes, mi volus konsili al li kaj liaj amikoj, ke ili estu pli singardaj.

— Mi ne komprenas, kial devus mia nomo koncerni iun ajn en Brio, — diris Frodo kolere, — kaj la kialo de via interesiĝo pri ĝi restas klarigota. S-ro Paŝegulo eble havas honestan kialon por spioni kaj subaŭskulti; sed se jes, mi konsilas al li konigi ĝin.

— Bone respondite! — diris Paŝegulo ridante. — Sed la klarigo estas simpla: mi serĉis hobiton nomatan Frodo Baginzo. Mi volis lin trovi rapide. Mi sciiĝis, ke li elportas el la Provinco, nu, sekreton, kiu koncernas min kaj miajn amikojn. Nu, ne miskomprenu min! — li kriis, kiam Frodo leviĝis de sia seĝo, kaj Sam saltstariĝis brovumante. — Mi gardos la sekreton pli bone ol vi, kaj singardo estas bezonata! — Li kliniĝis antaŭen kaj alrigardis ilin. — Gvatu ĉiun ombron! Nigraj Rajdantoj trapasis Brion. Lunde unu venis laŭ la Verdvojo de la nordo, oni diras; kaj alia aperis poste, venante laŭ la Verdvojo el la sudo.

Sekvis silento. Finfine Frodo diris al Grinĉjo kaj Sam:

— Mi devis konjekti tion pro la maniero de la pordista saluto. Kaj ŝajnas, ke la tavernestro aŭdis ion. Kial li insistis, ke ni aliĝu al la societo? Kaj kial, je kukolo, ni kondutis tiel stulte: ni estus devintaj resti kviete en tiu ĉi saloneto.

— Estus preferinde, — diris Paŝegulo. — Mi malhelpus vian eniron en la komunan salonon, se mi povus; sed la tavernestro ne volis enlasi min al vi, nek transdoni mesaĝon.

— Ĉu vi supozas, ke li... — komencis Frodo.

— Ne, mi ne pensas ion malbonan pri olda Buterburo. Tamen li ne tute ŝatas misterajn trampojn miaspecajn. — Frodo ĵetis al li rigardon perpleksan. — Nu, mi havas aspekton iom friponecan, ĉu ne? — diris Paŝegulo kun tordiĝo de sia lipo kaj stranga ekbrilo en la okuloj. — Sed espereble ni pli bone konatiĝos. Kiam tio okazos, kredeble vi klarigos, kio okazis fine de via kanto. Pro tiu eta truketo...

— Tio estis kompleta akcidento! — interrompis Frodo.

— Mi scivolas, — diris Paŝegulo. — Akcidento, do. Tiu akcidento

danĝerigis vian situacion.

— Apenaŭ pli ol antaŭe, — diris Frodo. — Mi sciis, ke tiuj Rajdantoj persekutas min; sed ĉiuokaze nun ili ŝajne maltrafis min kaj foriris.

— Ne kalkulu pri tio! — diris Paŝegulo akre. — Ili revenos. Kaj alvenos pliaj. Ekzistas aliaj. Mi konas la nombron. Mi konas tiujn Rajdantojn. — Li paŭzis, kaj liaj okuloj iĝis malvarmaj kaj malmolaj. — Kaj iuj personoj en Brio ne estas fidindaj. Ekzemple Vilĉjo Filikĉjo. Li havas misan reputacion en Brilando, kaj stranguloj vizitas lian domon. Vi certe rimarkis lin en la societo: brunvizaĝa rikana ulo. Li estis tre intima kun unu el la sudaj fremduloj, kaj ili elglitis kune tuj post via "akcidento". Ne ĉiuj sudanoj bonintencas; kaj se temas pri Filikĉjo, li vendus ion ajn al iu ajn; aŭ misfarus por amuziĝi.

— Kion vendos Filikĉjo, kaj kiel mia akcidento koncernas lin? — diris Frodo, obstinante malkompreni la aludojn de Paŝegulo.

— Informojn pri vi, kompreneble, — respondis Paŝegulo. — Priskribo de via prezentiĝo estus tre interesa al certaj personoj. Post tio ili apenaŭ bezonus informiĝi pri via reala nomo. Ŝajnas al mi nur tro probable, ke ili aŭdos pri tio antaŭ ol forpasos tiu ĉi nokto. Ĉu tio sufiĉas? Vi povas fari laŭplaĉe pri la rekompenco, akceptu min kiel gvidiston aŭ ne. Sed mi eble diru, ke mi konas ĉiujn landojn inter la Provinco kaj la Nebulecaj Montaroj, ĉar mi travagis ilin dum multaj jaroj. Mi estas pli aĝa ol mi aspektas. Mi eble pruviĝus utila. Vi devos forlasi la senŝirman vojon post la hodiaŭa nokto; ĉar la Rajdantoj deĵoros sur ĝi tage kaj nokte. Vi eble eskapos el Brio, kaj estos al vi permesate antaŭeniri dum la suno surĉielas, sed vi ne iros tre foren. Ili atingos vin en sovaĝejo, en iu malluma loko, kie helpo mankas. Ĉu vi deziras, ke ili trovu vin? Ili estas teruraj!

La hobitoj alrigardis lin, kaj vidis surprizite, ke lia vizaĝo estas tordita kvazaŭ pro doloro, kaj liaj manoj kroĉegas la brakapogilojn de lia seĝo. La ĉambro estis tre kvieta kaj senmova, kaj la lumo ŝajnis malbriliĝinta. Dum kelka tempo li sidis kun la okuloj nevidantaj kvazaŭ marŝante en fora rememoro aŭ aŭskultante malproksimajn sonojn en la nokto.

— Jen! —li diris post momento, movante la manon sur sia frunto. — Eble mi scias pri tiuj persekutantoj pli multe ol vi. Vi timas ilin, sed vi ankoraŭ ne timas ilin sufiĉe. Morgaŭ vi devos eskapi, se vi povos. Paŝegulo povos konduki vin laŭ padoj tre malofte tretitaj. Ĉu vi akceptos lin?

Sekvis peza silento. Frodo nenion respondis, lia menso estis konfuzita pro dubo kaj timo. Sam paŭtis, rigardis sian mastron kaj finfine li elpuŝis:

— Kun via permeso, s-ro Frodo, mi dirus ne! Tiu ĉi Paŝegulo, li konsilas kaj diras, ke ni gardu nin; kaj mi al tio diras *jes*!, kaj ni komencu pri li. Li venas el Sovaĝujo, kaj neniam mi aŭdis bonon pri tiaj personoj. Li

scias ion, estas evidente, kaj pli ol plaĉas al mi, sed tio ne estas kialo por permesi, ke li konduku nin al iu malluma loko malproksime de helpo, kiel li esprimis tion.

Grinĉjo movetiĝis kaj mienis malserene. Paŝegulo ne respondis al Sam, sed turnis siajn akrajn okulojn al Frodo. Frodo vidis tiun rigardon kaj sin forturnis.

— Ne, — li diris malrapide. — Mi ne konsentas. Mi pensas, mi pensas, ke vi ne estas vere tia, kia vi elektas aspekti. Komence vi parolis al mi kvazaŭ la briano, sed ŝanĝiĝis via voĉo. Tamen Sam ŝajnas prava pri tio ĉi: mi ne komprenas, kial vi konsilas al ni singardon, kaj tamen petas, ke ni akceptu vin fideme. Kial la sinkaŝo? Kiu vi estas? Kion vi fakte scias pri — pri mia afero — kaj kiel vi tion eksciis?

— La leciono pri singardemo estas bone lernita, — diris Paŝegulo kun seriozega rideto. — Sed singardemo estas unu afero kaj ŝanceliĝo estas alia. Vi neniam venos al Rivendelo per propraj rimedoj, kaj fido al mi estas via sola ebleco. Vi devas decidiĝi. Mi respondos iujn viajn demandojn, se tio helpos. Sed kial vi kredu mian historion, se vi ne fidas min ankoraŭ. Tamen jen ĝi...

Tiumomente aŭdiĝis frapo ĉe la pordo. S-ro Buterburo venis kun kandeloj, kaj malantaŭ li estis Nobo kun vazoj da varma akvo. Paŝegulo repaŝis en malhelan angulon.

— Mi venis por diri al vi bonan nokton, — diris la tavernestro, surtabligante la kandelojn. — Nobo! Portu la akvon al la ĉambroj! — Li enpaŝis kaj fermis la pordon.

— Estas tiele, — li komencis, hezitema kaj aspekte ĉagrenita. — Se mi kaŭzis misaĵon, mi ege bedaŭras. Sed unu afero elpelas alian, kiel vi scias, kaj mi estas tre okupata. Sed unu afero post alia vigligis mian memoron ĉi-semajne, Mel oni diras; kaj espereble ne tro malfrue. Vidu, mi estis petita atenti pri hobitoj el la Provinco, kaj precipe pri unu laŭnome Baginzo.

— Kaj kiel tio min koncernas? — demandis Frodo.

— Ha! vi agu laŭvole, — diris la tavernestro implice. — Mi ne malkaŝos vin; sed mi estis informita, ke tiu Baginzo vojaĝos laŭ la nomo Submonteto, kaj al mi estis donita priskribo, kiu sufiĉe taŭgas al vi, se mi rajtas tion diri.

— Ĉu vere? Do konigu ĝin! — diris Frodo, malsaĝe interrompante.

— "Grasuleto ruĝvanga", — diris s-ro Buterburo solene. Grinĉjo subridis, sed Sam mienis indigniĝon. — "Tio ne multe helpos vin: tiaj estas plimultaj hobitoj, Barlo, — li diris al mi", — daŭrigis s-ro Buterburo ekrigardante Grinĉjon. "Sed tiu ĉi estas pli alta ol iuj kaj pli bela ol la plimultaj, kaj li havas mentonan fendeton: viglulo kun brilaj okuloj".

Pardonu, sed tion diris li, ne mi.

— Tion diris *li*? Kaj kiu estis li? — demandis Frodo scivoleme.

— Ha! Tiu estis Gandalfo, se vi scias, al kiu mi aludas. Oni diras, ke li estas sorĉisto, sed, ĉu tiel aŭ ne, li estas mia bona amiko. Sed mi jam ne scias, kion li diros al mi, se mi lin revidos: acidigos mian tutan bieron aŭ igos min ligna ŝtipo, ne mirigus min. Li estas iom malpacienca. Tamen farite ne povas esti malfarite.

— Nu, kion vi faris? — diris Frodo, senpaciencante pri la malrapida disvolvo de liaj pensoj.

— Kien mi alvenis? — diris la tavernestro, paŭzante kaj klakigante la fingrojn. — Ha, jes! Maljuna Gandalfo. Antaŭ tri monatoj li enpaŝis rekte en mian ĉambron, nefrapinte: "Barlo, mi ekiros morgaŭ. Ĉu vi faros al mi komplezon?" — "Necesas ĝin nur nomi", — mi diris. — "Mi hastas, — diris li, — kaj mi mem ne disponas tempon, sed mi deziras sendi mesaĝon al la Provinco. Ĉu vi konas iun, kiun vi povos sendi, kaj fidi, ke li iru?" — "Mi povas trovi iun, — mi diris, — eble morgaŭ aŭ postmorgaŭ". — "Estu morgaŭ", — li diris, kaj poste transdonis al mi leteron. — Ĝi estas adresita sufiĉe klare, — diris s-ro Buterburo, elpoŝigante leteron, kaj laŭtlegante malrapide kaj fiere (li fieris pri sia reputacio de legoscianto) la adreson:

S-ro FRODO BAGINZO, BAG-ENDO, HOBITURBO en la PROVINCO.

— Letero al mi de Gandalfo! — kriis Frodo.

— Ha! — diris s-ro Buterburo. — Do via ĝusta nomo estas Baginzo?

— Tiel estas, — diris Frodo, — sed prefere tuj donu al mi tiun leteron kaj klarigu, kial vi neniam sendis ĝin. Vi ja venis por sciigi tion al mi, supozeble, kvankam vi bezonis longan tempon por atingi la celon.

Kompatinda s-ro Buterburo aspektis ĉagrenita.

— Vi pravas, mastro, — li diris, — kaj mi petas vian pardonon. Kaj mi morte timas tion, kion diros Gandalfo, se el tio venos io misa. Sed ne intence mi retenis ĝin. Mi formetis ĝin sekure. Poste mi trovis neniun, kiu pretis iri al la Provinco la morgaŭan, nek la postan tagon, kaj neniu el miaj propraj servistoj estis malhavebla; kaj poste unu afero post alia forpelis tion el mia menso. Mi estas homo okupata. Mi faros, kion mi povos, por rebonigi la aferon, kaj se mi povos iel helpi, necesas ĝin nur nomi. Flankenigante la leteron, mi promesis al Gandalfo neniom malpli. "Barlo, — li diris al mi, — tiu mia amiko el la Provinco eble venos ĉi tien post nelonge, li kaj alia. Li nomos sin Submonteto. Memoru tion! Sed ne necesas starigi demandojn. Kaj se mi ne akompanos lin, li eble havos problemojn,

kaj li eble bezonos helpon. Fam kion vi povos por li, kaj mi estos danka”, — li diris. Kaj jen vi estas, kaj problemoj ne malproksimas verŝajne.

— Kion vi celas? — demandis Frodo.

— Tiuj nigruloj, — diris la tavernestro, mallaŭtigante la voĉon. — Ili serĉas *Baginzon*, kaj se ili bonintencas, tiam mi estas hobito. Tio estis lunde, kaj ĉiuj hundoj bojis kaj la anseroj kriĉis. Malordinaraĵo, mi nomis tion. Nobo venis kaj diris al mi, ke du nigruloj estas ĉe la pordo demandante pri hobito nomata Baginzo. La haroj de Nobo hirtiĝis. Mi ordonis al la nigruloj foriri kaj klakfermis la pordon antaŭ ili, sed ili starigis la saman demandon tra la tuta vojo ĝis Arketo, mi aŭdis. Kaj ankaŭ tiu disirulo Paŝegulo starigadis demandojn. Li provis eniri ĉi tien al vi, antaŭ ol vi manĝis aŭ trinkis, tion li faris.

— Tion li faris! — diris Paŝegulo subite, enpaŝante en la lumon. — Kaj multe da ĝeno estus ŝparita, se vi enlasus lin, Barlimano.

La tavernestro eksaltis surprizite.

— Vi! — li kriis. — Vi ĉiam enpuŝiĝas. Kion vi nun volas?

— Li ĉeestas laŭ mia permeso, — diris Frodo. — Li venis por proponi al mi helpon.

— Nu, vi regas la propran aferon, eble, — diris s-ro Buterburo, rigardante suspekteme al Paŝegulo. — Sed se mi estus kiel vi perpleksigita, mi ne aliĝus al disirulo.

— Al kiu vi aliĝus do? — demandis Paŝegulo. — Ĉu al grasa tavernestro, kiu memoras sian propran nomon nur pro tio, ke oni kriadas ĝin al li la tutan tagon? Ili ne povas resti eterne ĉe *La Poneo*, kaj ili ne povas iri hejmen. Antaŭ ili estas longa vojo. Ĉu vi akompanos ilin kaj fortenos la nigrulojn?

— Mi? Forlasi Brion! Tion mi ne faros kontraŭ iom ajn da mono, — diris s-ro Buterburo, mienante vere timigite. — Sed kial vi ne povas resti ĉi tie kviete dum kelka tempo, s-ro Submonteto? Kiaj estas tiuj strangaj okazaĵoj? Kion celas tiuj nigruloj, kaj de kie ili venas, mi volus scii?

— Mi bedaŭras, ke mi ne povas klarigi ĉion, — respondis Frodo. — Mi estas laca kaj tre zorgoplena, kaj la rakonto estas longa. Sed se vi intencas helpi min, mi devas averti vin, ke danĝero vin minacos tiel longe, kiel mi estas en via domo. Tiuj Nigraj Rajdantoj, mi ne certas, sed mi opinias, mi timas, ke ili venis de...

— Ili venis de Mordoro, — diris Paŝegulo per mallaŭta voĉo. — De Mordoro, Barlimano, se tio signifas ion ajn al vi.

— Gardu nin! — kriis s-ro Buterburo, paliĝante; la nomo evidente estis konata al li. — Tio estas la plej malbona novaĵo veninta al Brio dum mia vivo.

— Tia ĝi estas, — diris Frodo. — Ĉu vi ankoraŭ pretas helpi min?

— Mi pretas, — diris s-ro Buterburo. — Pli ol antaŭe. Kvankam mi ne scias kion povas fari tia, kia mi, kontraŭ, kontraŭ... — li hezitis.

— Kontraŭ la Ombro en la Oriento, — diris Paŝegulo kviete. — Ne multe, Barlimano, sed ĉiu malmulto helpas. Vi povas permesi, ke s-ro Submonteto tranoktu ĉi tie hodiaŭ, kiel s-ro Submonteto, kaj vi povas forgesi la nomon Baginzo, ĝis li estos malproksime for.

— Tion mi faros, — diris Buterburo. — Sed ili malkovros, ke li estas ĉi tie, sen mia helpo, mi timas. Estas domaĝe, ke s-ro Baginzo atentigis pri si hodiaŭ vespere, se diri nenion plian. Tiu rakonto pri la foriro de s-ro Bilbo estas aŭdita en Brio antaŭ la hodiaŭa vespero. Eĉ nia Nobo okupiĝis pri konjektado en sia lanta kapo, kaj troviĝas aliaj en Brio pli penskapablaj ol li.

— Nu, ni povas nur esperi, ke la Rajdantoj ne ankoraŭ revenos, — diris Frodo.

— Espereble ne, efektive, — diris Buterburo. — Sed ĉu fantomoj aŭ ne, ili ne tiel facile eniros *La Poneon*. Ne ĝenu vin ĝis la mateno. Nobo nenion diros. Neniu nigrulo trapasos miajn pordojn, dum mi ankoraŭ kapablas stari. Mi kaj miaj servistoj deĵoros hodiaŭ nokte; sed prefere vi iom dormu, se vi povas.

— Ĉiuokaze necesas, ke oni voku nin frumatene, — diris Frodo. — Ni devos ekiri laŭeble frue. Matenmanĝon je la sesa kaj duono, mi petas.

— Bone! Mi aranĝos la mendon, — diris la tavernestro. — Bonan nokton, s-ro Baginzo — Submonteto, mi devus diri! Bonan nokton — nu, mi estu benita! Kie estas via s-ro Brandoboko?

— Mi ne scias, — diris Frodo, subite ĉagrenite. Ili forgesis pri Gaja, kaj iĝis malfrue. — Mi timas, ke li foriris. Li diris ion pri spiro da freŝa aero.

— Nu, vi ja bezonas prizorgadon, senerare: via grupo agas kvazaŭ feriante! — diris Buterburo. — Mi devas iri kaj ŝlosi la pordojn tuje, sed mi certigos, ke via amiko estu enlasita, kiam li venos. Prefere mi sendu Nobon por lin serĉi. Bonan nokton al vi ĉiuj! — Finfine s-ro Buterburo eliris, post plia dubema rigardo al Paŝegulo kaj skuo de la kapo. Liaj paŝoj forsoniĝis laŭ la koridoro.

— Nu? — diris Paŝegulo. — Ĉu vi intencas malfermi tiun leteron? Frodo zorge ekzamenis la sigelon antaŭ ol rompi ĝin. Ĝi certe ŝajnis de Gandalfo. Interne, skribite per la forta sed eleganta manskribo de la sorĉisto, estis jena mesaĝo:

> LA PRANCA PONEO, BRIO.
> Jarmeza Tago, Provinca Jaro, 1418.
> Kara Frodo,
> Atingis min ĉi tie malbona sciigo. Mi devas tuj foriri. Prefere vi forlasu

baldaŭ Bag-Endon, kaj forlasu la Provincon plej malfrue fine de julio. Mi revenos kiel eble plej baldaŭ; kaj mi sekvos vin, se mi trovos, ke vi foriris. Lasu mesaĝon por mi ĉi tie, se vi trapasos Brion. Vi povas fidi al la tavernestro (Buterburo). Vi eble renkontos survoje amikon mian: Viro,maldika, malhela, alta, de iuj nomata Paŝegulo. Li konas nian aferon kaj helpos vin. Celu al Rivendelo. Tie mi esperas renkonti vin denove. Se mi ne venos, Elrondo konsilos al vi.

Via haste

GANDALFO

PS. NE uzu Ĝin denove, tute nenial! Ne vojaĝu dumnokte!

PPS. Certiĝu, ke tiu estas la malfalsa Paŝegulo. Sur la vojoj estas multaj fremduloj. Lia vera nomo estas Aragorno.

Oro ne ĉiam ekbrilas,
Ne ĉiuj vagantoj paneas;
Forta maljun' ne senilas,
Profunda radik' ne pereas.
El cindroj la fajro denovos,
El ombroj la lumo resaltos;
La glavo rompita renovos,
Senkrona la reĝ' reekzaltos.

PPPS. Mi esperas, ke Buterburo ekspedos tion ĉi senprokraste. Inda homo, sed lia memoro similas al deponejo: aĵo bezonata ĉiam estas superŝutita. Se li forgesos, mi lin rostos.

Ĝis revido!

Frodo legis silente la leteron, kaj poste transdonis ĝin al Grinĉjo kaj Sam.

— Vere, olda Buterburo fuŝegis! — li diris. — Li meritas rostiĝon. Se mi ricevus tion tuj, ni eble ĉiuj estus jam sekuraj en Rivendelo. Sed kio povis okazi al Gandalfo? Li skribas, kvazaŭ li alirus grandan danĝeron.

— Tion li faris jam de multaj jaroj, — diris Paŝegulo.

Frodo sin turnis kaj rigardis lin penseme, scivolante pri la dua postskribo de Gandalfo.

— Kial vi ne diris al mi, ke vi estas amiko de Gandalfo? Tio ŝparigus tempon.

— Ĉu vere? Ĉu iu el vi min kredis ĝis nun? — diris Paŝegulo. — Mi sciis nenion pri tiu letero. Laŭ mia scio mi devis persvadi vin, ke vi fidu al mi sen pravoj, se mi esperis helpi al vi. Ĉiuokaze mi ne intencis tuj rakonti ĉion pri mi. Mi devis studi vin unue, kaj certiĝi pri vi. La Malamiko jam pli frue aranĝis kaptilojn por mi. Tuj kiam mi decidiĝis, mi estis preta respondi kion ajn vi demandos. Sed konfesinde, — li aldonis kun stranga rido, — mi esperis, ke vi akceptos min propramerite. Persekutato foje enuiĝas pri malfido kaj sopiras amikecon. Sed verŝajne mia aspekto malhelpas tion.

— Tio jes — unuavide, almenaŭ, — ridis Grinĉjo pro subita malŝarĝo, leginte la leteron de Gandalfo. — Sed bela faro estas pruva faro, kiel ni diras en la Provinco; kaj sendube ni ĉiuj aspektos iom simile, pasiginte tagojn kuŝe sub heĝoj kaj en fosaĵoj.

— Necesos pli ol kelkaj tagoj, semajnoj aŭ jaroj da vagado en Sovaĝujo por vin aspektigi kiel Paŝegulo, — li respondis. — Kaj pli frue vi mortos, se vi ne estas pli fortikaj ol ŝajnas.

Grinĉjo senentuziasrniĝis; sed Sam ne estis malkuraĝigita, kaj li daŭre rigardis Paŝegulon dubeme.

— Kiel ni sciu, ke vi estas tiu Paŝegulo, pri kiu skribis Gandalfo? — li demandis. — Vi neniam menciis Gandalfon ĝis aperis tiu letero. Eble vi estas aktoranta spiono, laŭ ĉio konata al mi, kiu klopodas persvadi nin al via akompano. Eble vi mortigis la malfalsan Paŝegulon kaj prenis liajn vestaĵojn. Kion vi volas diri pri tio?

— Ke vi estas bravulo, — respondis Paŝegulo; — sed bedaŭrinde mia sola respondo al vi, Sam Vato, estas jena. Se mi mortigus la malfalsan Paŝegulon, mi kapablus mortigi *vin*. Kaj mi estus jam vin mortiginta sen tiom da parolado. Se mi celus la Ringon, mi povus havi ĝin — *jam*!

Li stariĝis, kaj ŝajnis subite plialtiĝi. En liaj okuloj brilis lumo, akra kaj komanda. Retropuŝinte sian mantelon, li metis manon al la tenilo de glavo, kiu pendis kaŝite ĉe lia flanko. Ili ne aŭdacis moviĝi. Sam sidis kaj mute gapis lin.

— Sed feliĉe mi *estas* la malfalsa Paŝegulo, — li diris, subenrigardante al ili kun vizaĝo mildigita de subita rideto. — Mi estas Aragorno filo de Aratorno, kaj se mi povos per vivo aŭ per morto vin savi, mi tion faros.

Sekvis longa silento. Finfine Frodo ekparolis heziteme.

— Mi kredis vin amiko antaŭ ol la letero venis, — li diris, — aŭ almenaŭ mi volis tion. Vi plurfoje timigis min hodiaŭ vespere, sed neniam

tiel, kiel timigus servistoj de l' Malamiko, aŭ tion mi imagas. Al mi ŝajnas, ke iu el ties spionoj — nu, aspektas pli fidinda kaj sentiĝas pli misa, se vi komprenas.

— Mi komprenas, — ridis Paŝegulo. — Mi aspektas mise kaj sentiĝas fidinde. Ĉu tiel? *Oro ne ĉiam ekbrilas, ne ĉiuj vagantoj paneas*.

— Ĉu do la versoj estas pri vi? — demandis Frodo. — Mi ne povis kompreni, pri kio temas. Sed kiel vi sciis, ke ili estas en la letero de Gandalfo, se vi ĝin neniam vidis?

— Mi ne sciis, — li respondis. — Sed mi estas Aragorno, kaj tiuj versoj konvenas al tiu nomo. — Li elingigis sian glavon, kaj ili vidis, ke la klingo estas efektive rompita unu futon sub la tenilo. — Ne multe utilas, ĉu, Sam? — diris Paŝegulo. — Sed proksimiĝas la tempo, kiam ĝi estos nove forĝita. Sam diris nenion.

— Nu, — diris Paŝegulo, — kun permeso de Sam, mi nomos tion aranĝita. Paŝegulo estos via gvidanto. Ni havos malserenan vojaĝon morgaŭ. Eĉ se estos permesate al ni forlasi Brion sen malhelpoj, ni vere ne povas esperi, ke ni lasos ĝin nerimarkate. Sed mi klopodos perdiĝi laŭeble baldaŭ. Mi konas unu-du vojojn el Brilando krom la ĉefa vojo. Se fine ni forskuos la persekuton, mi celos al Veterverto.

— Ĉu Veterverto? — diris Sarn. — Kio estas tio?

— Ĝi estas monteto, ĝuste norde de la Vojo, proksimume duonvoje de ĉi tie al Rivendelo. Ĝi ebligas larĝan vidkampon ĉiudirekten; kaj tie ni havos eblecon ĉirkaŭrigardi. Gandalfo venos al tiu punkto, se li sekvos nin. Post Veterverto nia vojaĝo plimalfaciliĝos, kaj ni devos elekti inter diversaj danĝeroj.

— Kiam vi lastfoje vidis Gandalfon? — demandis Frodo. — Ĉu vi scias, kie li estas, aŭ kion li faras?

Paŝegulo gravmienis.

— Mi ne scias, — li diris. — Mi akompanis lin okcidenten printempe. Mi ofte deĵoris rande de la Provinco dum la pasintaj kelkaj jaroj, kiam li okupiĝis aliloke. Li malofte lasis ĝin negardita. Ni lastfoje renkontiĝis la unuan de majo: ĉe trapasejo Sarno sur Brandovino. Li diris al mi, ke lia afero kun vi rezultis bone, kaj vi ekiros al Rivendelo en la lasta semajno de septembro. Ĉar mi sciis, ke li apudas vin, mi foriris laŭ propra vojaĝo. Kaj tio pruviĝis misa; ĉar evidente atingis lin ia sciigo kaj mi ne kunestis por helpi.

» Mi havas zorgojn, la unuan fojon de kiam mi ekkonis lin. Ni devus ricevi mesaĝon, eĉ se li ne povis veni mem. Kiam mi revenis, antaŭ multaj tagoj, mi aŭdis malbonan novaĵon. Larĝe disvastiĝis onidiro, ke Gandalfo netroveblas, kaj la Rajdantoj estas viditaj. Tion diris al mi la elfa popolo de

Gildoro; kaj poste ili sciigis al mi, ke vi forlasis vian hejmon; sed mankis sciigo, ke vi forlasis Boklandon. Mi gvatis la Orientan Vojon zorgoplene.

— Ĉu vi opinias, ke la Nigraj Rajdantoj estas implikitaj en tio — mi volas diri, en la netrovebleco de Gandalfo? — demandis Frodo.

— Mi scias nenion, kio povis malhelpi lin, krom la Malamiko mem, — diris Paŝegulo. — Sed ne malesperu! Gandalfo estas pli potenca, ol scias vi Provincanoj — kutime vi vidas nur liajn ŝercojn kaj ludilojn. Sed tiu ĉi nia afero estos lia plej peza tasko.

Grinĉjo oscedis.

— Pardonpete, — li diris, — sed mi estas morte laca. Malgraŭ la tuta danĝero kaj zorgo mi devas enlitiĝi, aŭ dormi sur la seĝo. Kie estas tiu folulo, Gaja? Estus la fina bato, se ni devus eliri en la mallumon por serĉi lin.

Ĝuste tiam ili aŭdis klakon de pordo. Poste piedoj kure alvenis laŭ la koridoro. Gaja enkuregis, sekvate de Nobo. Li haste fermis la pordon, kaj apogiĝis al ĝi. Li estis spireganta. Ili fiksrigardis lin timigite dum momento antaŭ ol li elpuŝis:

— Mi vidis ilin, Frodo! Mi vidis ilin! Nigrajn Rajdantojn!

— Nigrajn Rajdantojn! — kriis Frodo. — Kie?

— Ĉi tie. En la vilaĝo. Mi restis endome dum unu horo. Poste, ĉar vi ne revenis, mi eliris por promeni. Mi jam revenis kaj staris ekster la lumo de la lampo rigardante la stelojn. Subite mi ektremis kaj sentis, ke alrampas io horora: troviĝis ia ombro pli profunda inter la ombroj aliflanke de la vojo, ĝuste lime de la lamplumo. Ĝi forglitis tuj en la mallumon sensone. Ĉevalo ne troviĝis.

— Laŭ kiu direkto ĝi foriris? — demandis Paŝegulo subite kaj akre. Gaja surpriziĝis, rimarkante la fremdulon je la unua fojo.

— Daŭrigu! — diris Frodo. — Li estas amiko de Gandalfo. Mi klarigos poste.

— Ĝi ŝajnis foriri laŭ la Vojo, orienten, — daŭrigis Gaja. — Mi provis sekvi. Kompreneble, ĝi malaperis preskaŭ tuj; sed mi ĉirkaŭiris la angulon kaj iris antaŭen ĝis la lasta domo apud la Vojo.

Paŝegulo mire rigardis Gajan.

— Vi havas bravan koron, — li diris, — sed tio estis stulta.

— Mi ne scias, — diris Gaja. — Nek brava, nek stulta, ŝajnas al mi. Mi apenaŭ regis min. Iel mi ŝajnis tiriĝi. Ĉiuokaze, mi iris, kaj subite mi aŭdis voĉojn apud la dornbarilo. Unu murmuris, kaj la alia flustris aŭ siblis. Eĉ unu vorton de la diraĵo mi ne kaptis. Mi ne alrampis pli proksimen, ĉar mi komencis tremi per la tuta korpo. Poste mi ektimegis, kaj mi retroturniĝis, kaj estis ĝuste ekkuronta hejmen, kiam io venis de malantaŭe kaj mi... mi

falis.

— Mi trovis lin, sinjoro, — enŝovis Nobo. — S-ro Buterburo sendis min kun lanterno. Mi iris ĝis la Okcidenta pordego, kaj poste revene al la Suda pordego. Tute proksime al la domo de Vilĉjo Filikĉjo, mi pensis vidi ion sur la Vojo. Mi tion ne ĵure atestus, sed ŝajnis al mi, ke du viroj kliniĝas super io, ĝin levante. Mi ekkriis, sed kiam mi atingis la lokon, ili ne videblis, kaj nur s-ro Brandoboko kuŝis apud la vojo. Li ŝajnis dormanta. "Ŝajnis al mi, ke mi falis en profundan akvon", — li diris al mi, kiam mi skuis lin. Tre stranga li estis, kaj tuj kiam mi vekis Mn, li stariĝis kaj ekkuris denove ĉi tien kvazaŭ leporo.

— Bedaŭrinde tio estas vera, — diris Gaja, — kvankam mi ne scias, kion mi diris. Mi spertis koŝmaron, kiun mi ne povas rememori. Mi kolapsis. Mi ne scias, kio min tuŝis.

— Mi scias, — diris Paŝegulo. — La Nigra Spiro. La Rajdantoj verŝajne lasis ekstere siajn ĉevalojn, kaj trapasis sekrete la Sudan pordegon. Certe ili jam scias la tutan novaĵon, ĉar ili vizitis Vilĉjon Filikĉjon; kaj probable ankaŭ tiu sudano estis spiono. Io eble okazos dum la nokto, antaŭ ol ni forlasos Brion.

— Kio okazos? — diris Gaja. — Ĉu ili atakos la tavernon?

— Ne, mi pensas, ke ne, — diris Paŝegulo. — Ne ĉiuj estas jam ĉi tie. Kaj ĉiuokaze ne tiel ili agas. Ili plej fortas en mallumo kaj soleco; ili ne volas malkaŝe ataki domon, kie estas lumoj kaj multaj homoj — ne ĝis ili estas pelataj, ne dum ankoraŭ kuŝas antaŭ ni la multaj longaj mejloj de Eriadoro. Sed ilia potenco fontas en teruro, kaj jam iuj en Brio estas trafitaj de ili. Ili devigos tiujn mizerulojn fari ion misan: Filikĉjon kaj iujn el la fremduloj, kaj, eble ankaŭ la pordiston. Ili interparolis kun Henĉjo ĉe la Okcidenta pordego lunde. Mi rigardis ilin. Li estis pala kaj tremanta, kiam ili forlasis lin.

— Ŝajnas, ke ni havas malamikojn ĉie, — diris Frodo. — Kion ni faru?

— Restu ĉi tie kaj ne iru al viaj ĉambroj! Ili certe eltrovis pri kiuj ĉambroj temas. La hobito-ĉambroj havas fenestrojn, kiuj rigardas norden kaj proksimas al la tero. Ni restos ĉiuj kune kaj baros tiun ĉi fenestron kaj la pordon. Sed unue Nobo kaj mi alportos viajn pakaĵojn.

Dum Paŝegulo forestis, Frodo rapide rakontis al Gaja pri ĉio okazinta post la vespermanĝo. Gaja ankoraŭ legis kaj pripensis la leteron de Gandalfo kiam Paŝegulo kaj Nobo revenis.

— Nu, Mastroj, — diris Nobo, — mi ĉifis la litotukojn kaj enŝovis kapkusenon en la mezon de ĉiu lito. Kaj mi kreis belan imitaĵon de via kapo per bruna lana mato, s-ro Bag... Submonteto, sinjoro, — li aldonis rikane.

— Tre vivsimila! — ridis Grinĉjo. — Sed kio okazos, kiam ili ekvidos

la ŝajnigon?

— Ni vidos, — diris Paŝegulo. — Ni esperu defendi la fortikaĵon ĝis la mateno.

— Bonan nokton al vi, — diris Nobo, kaj foriris por ludi sian rolon en la pordgardado.

Siajn pakaĵojn kaj ilaron ili amasigis sur la salonplanko. Ili puŝis malaltan seĝon kontraŭ la pordon kaj fermis la fenestron. Elgvatante, Frodo vidis, ke la nokto daŭre klaras. La Falĉilo[7] svingiĝis brile super Brimonteto. Li poste fermis kaj riglis la pezajn internajn ŝutrojn kaj kuntiris la kurtenojn. Paŝegulo hejtis la kamenon kaj blovestingis la kandelojn.

La hobitoj kuŝiĝis sur siaj lankovriloj kun la piedoj direktitaj al la kameno, sed Paŝegulo ordigis sin sur la kontraŭporda seĝo. Ili interparolis dum iom da tempo, ĉar Gaja volis ankoraŭ starigi kelkajn demandojn.

— Bovin' translunis muĝe! — subridis Gaja, volvante sin per sia lankovrilo. — Tre ridinde, Frodo! Sed mi volonte ĉeestus. La bravuloj en Brio ankoraŭ diskutos tion post cent jaroj.

— Espereble, — diris Paŝegulo.

Poste ili ĉiuj silentiĝis, kaj unu post alia la hobitoj endormiĝis.

11

Ponardo en mallumo

Dum ili pretiĝis dormi en la taverno en Brio, mallumo kovris Boklandon; nebuleto vagis en la valetoj kaj laŭ la riverbordo. La domo en Stretkavo staris silenta. Dikulo Bolĝero singarde malfermis la pordon kaj elrigardis. Timosento kreskis en li la tutan tagon, kaj li povis nek trankvili nek enlitiĝi: en la senspira noktoaero ŝvebis minaco. Dum li fiksrigardis en la malhelon, nigra ombro moviĝis sub la arboj, la pordo ŝajne propravole malfermiĝis kaj senbrue refermiĝis. Timego ekkaptis lin. Tiam li fermis kaj riglis la pordon.

La nokto plinigriĝis. Aŭdiĝis mallaŭta bruo de ĉevaloj kaŝe kondukataj laŭ la pado. Ekster la ĝardenpordo haltis kaj eniris tri nigraj figuroj, kiel ombroj de la nokto ŝtelirantaj trans la terenon. Unu iris ĝis la pordo, po unu al ambaŭflankaj domanguloj; kaj tie ili staris, senmovaj kiel ombroj de ŝtonoj, dum la nokto malrapide pasis. La domo kaj la kvietaj arboj ŝajnis atendi senspire.

Okazis eta moviĝo en la foliaro, kaj koko kikerikis malproksime. Estis pasanta la frida horo antaŭ la tagiĝo. La apudporda figuro moviĝis. En la mallumo sen luno aŭ steloj ekbrilis elingita ponardo, kvazaŭ estus elingita lumo malvarmega. Aŭdiĝis bato, mallaŭta sed peza, kaj la pordo tremegis.

— Malfermu, je la nomo de Mordoro! — diris voĉo maldensa kaj minaca.

Je la dua bato la pordo cedis kaj malfermiĝis kun rompitaj tabuloj kaj frakasita seruro. La nigraj figuroj rapide eniris.

Tiumomente, inter la apudaj arboj, korno klarionis. Ĝi traŝiris la nokton kvazaŭ incendio ĉe montosupro.

VEKIĜU! TIMU! FAJRO! MALAMIKOJ! VEKIĜU!

Dikulo Bolĝero ne restis senfara. Tuj kiam li vidis la malhelajn formojn ŝteliri el la ĝardeno, li sciis, ke li devas forkuri aŭ perei. Kaj li do kuris, tra la malantaŭa pordo, tra la ĝardeno, kaj tra la kampoj.

Alveninte la plej proksiman domon, pli ol mejlon for, li falis sur la sojlo.

— Ne, ne, ne! — li kriadis. — Ne, ne mi! Ne mi havas ĝin! — Pasis iom da tempo antaŭ ol oni povis kompreni, pri kio li babilas. Finfine ili konstatis, ke malamikoj troviĝas en Boklando, ia stranga invado el la

Malnova Arbaro. Kaj tiam ili ne plu perdis tempon.

TIMU! FAJRO! MALAMIKOJ!

La brandobokoj blovis la Korn-alarmon de Boklando, kiu ne estis aŭdigita jam de cent jaroj, depost la alveno de blankaj lupoj, kiam Brandovino estis glaciigita.

VEKIĜU! VEKIĜU!

Fore aŭdiĝis respondaj kornoj. La alarmo disvastiĝis.

La nigraj figuroj fuĝis el la domo. Unu el ili faligis hobitan mantelon sur la ŝtupo dum li kuris. Sur la pado hufobruo eksonis, kaj galopante foriris martelbate en la mallumon. Tra la tuta Stretkavo sonis kornoj klarionantaj, voĉoj kriantaj kaj piedoj kurantaj. Sed la Nigraj Rajdantoj rajdis tempeste al la Norda Pordego. Lasu la etulojn klarioni! Saŭrono pritraktos ilin poste. Intertempe ili havis alian taskon: ili jam sciis, ke la domo estas malplena kaj la Ringo foririnta. Ili surrajdis la gardantojn ĉe la pordego kaj malaperis el la Provinco.

Frue dum la nokto Frodo vekiĝis el profunda dormo, subite, kvazaŭ maltrankviligis lin ia sono aŭ eeesto. Li vidis, ke Paŝegulo sidas vigla sur sia seĝo: ties okuloj ekbrilas pro la lumo de la fajro, kiu estis hejtita kaj hele flamis; sed li nenion signis nek iel moviĝis.

Frodo baldaŭ reendormiĝis; sed liajn sonĝojn denove perturbis bruo de vento kaj galopantaj hufoj. La vento ŝajnis kurbiĝi ĉirkaŭ la domon kaj ĝin skui; kaj malproksime li aŭdis kornon malaplombe klarionantan. Li malfermis siajn okulojn kaj aŭdis viglan kikerikon de koko en la taverna korto. Paŝegulo estis malferminta la kurtenojn kaj repuŝis brue la ŝutrojn. En la ĉambro estis la unua griza taglumo, kaj malvarma aero eniris tra la malfermita fenestro.

Tuj post kiam Paŝegulo vekis ĉiujn, li kondukis ilin al iliaj dormoĉambroj. Kiam ili vidis tiujn, ili ĝojis, ke ili akceptis lian konsilon: la fenestroj estis trudapertitaj kaj svingiĝis, kaj la kurtenoj klakflirtis, la litaĵoj estis disĵetitaj, kaj la kapkusenoj trapikitaj kaj ĵetitaj planken; la bruna mato estis disŝirita.

Paŝegulo tuj iris venigi la tavernestron. Kompatinda s-ro Buterburo aspektis dormema kaj timigita. Li apenaŭ fermis la okulojn dum la tuta nokto (tion li diris), sed sonon li neniam aŭdis.

— Neniam okazis tia afero dum mia vivo! — li kriis, levante terurite la manojn. — Gastoj malhelpataj dormi en la litoj, kaj cetere ruinigitaj bonstataj kapkusenoj! Ĝis kio ni venas?

— Epoko malhela, — diris Paŝegulo. — Sed dume oni eble lasos vin

trankvila, post liberiĝo de ni. Ni foriros tuj. Ne zorgu pri matenmanĝo: trinkaĵo kaj mordaĵo dumstare devos sufiĉi. Ni estos pakintaj post kelkaj minutoj.

S-ro Buterburo rapidis for, por certiĝi, ke la poneoj estu pretigitaj, kaj por alporti al ili “mordaĵon”. Sed tre baldaŭ li revenis senespere. La poneoj malaperis! La stalpordoj estis ĉiuj malfermitaj nokte, kaj ĉiuj foriris: ne nur la poneoj de Gaja, sed ankaŭ ĉiuj aliaj ĉevaloj kaj brutoj de la loko.

Frodo estis frakasita pro la sciigo. Kiel ili esperu atingi Rivendelon piede, persekutate de rajdantaj malamikoj? Same sukcese ili celus la lunon. Paŝegulo sidis silente dum kelka tempo, rigardante la hobitojn, kvazaŭ taksante ties forton kaj kuraĝon.

— Poneoj ne helpus eskapi de la Rajdantoj, — li diris finfine, penseme, kvazaŭ li divenis tion, kion Frodo pensas. — Ni ne irus multe malpli rapide piede sur la vojoj, kiujn mi intencas sekvi. Mi intencis ĉiuokaze marŝi. Ĝenas min tamen la nutraĵo kaj provizaĵoj. Ni ne povas kalkuli pri ricevo de manĝaĵoj inter tie ĉi kaj Rivendelo, krom tio, kion ni kunportos; kaj ni devus kunporti multe da rezervaĵo, ĉar ni eble estos malhelpataj aŭ devos ĉirkaŭiri, tre for de la rekta vojo. Kiom vi pretas porti sur viaj dorsoj?

— Tiom, kiom necesas, — diris Grinĉjo kun la koro malĝojiĝa, sed provante montri, ke li estas pli fortika ol li aspektas (aŭ sin sentas).

— Mi povas porti duoblan ŝarĝon, — diris Sam defie.

— Ĉu nenio estas farebla, s-ro Buterburo? — demandis Frodo. — Ĉu ni ne povas akiri paron da poneoj en la vilaĝo, aŭ eĉ nur unu por la pakaĵoj? Supozeble ni ne povus lui ilin, sed ni eble povus aĉeti, — li aldonis, dubeme, scivolante ĉu por tio sufiĉus lia mono.

— Dubinde, — diris la tavernestro malĝoje. — La du-tri rajdponeoj en Brio estis enstalitaj en mia korto, kaj tiuj foriris. Aliaj bestoj, ĉevaloj aŭ poneoj trenkapablaj kaj tiel plu, tre malmultas en Brio, kaj ili ne estos aĉeteblaj. Sed mi faros, kion mi povos. Mi elfosos Bobon kaj elsendos lin laŭeble baldaŭ.

— Jes, — diris Paŝegulo malvolonte, — prefere faru tion. Mi timas, ke necesas provi akiri almenaŭ unu poneon. Sed tiel finiĝas ĉiu espero pri frua ekiro, kaj kvieta forŝteliro! Ni same profite estus blovintaj kornon por anonci nian foriron. Tio estis parto de ilia plano, sendube.

— Troviĝas unu ero da konsolo, — diris Gaja, — kaj pli ol ero, espereble: ni povos matenmanĝi dum ni atendas — kaj por tio sidiĝi. Ni kaptu Nobon!

Fine la prokrasto daŭris pli ol tri horojn. Bobo revenis kun raporto, ke en la najbaraĵo neniu ĉevalo aŭ poneo estas akirebla kontraŭ io ajn — escepte de unu: Vilĉjo Filikĉjo havas unu, kiun li eble vendos.

— Povra maljuna duonnutrita kreito ĝi estas, — diris Bobo, — sed li ne liberiĝos de ĝi kontraŭ malpli ol la trioblo de ĝia valoro, pro via situacio, se mi konas Vilĉjon Filikĉjon.

— Vilĉjo Filikĉjo? — diris Frodo. — Ĉu ne enestas ia truko? Ĉu la bruto ne rekurus al li kun nia tuta posedaĵo, aŭ helpus spuri nin, aŭ io?

— Povas esti, — diris Paŝegulo. — Sed mi ne povas imagi, ke ajna besto rekurus hejmen al li, se ĝi nur eskapus. Al mi ŝajnas, ke tio ĉi estas nura postpensaĵo de l' afabla Mastro Filikĉjo: simple maniero pligrandigi sian profiton el la afero. Ĉefa danĝero estas, ke tiu povra besto probable estas tuj mortonta. Sed ŝajne mankas elektebleco. Kiom li postulas por ĝi?

La postulo de Vilĉjo Filikĉjo estis dek du arĝentaj moneroj; kaj tio efektive estis minimume trioblo de l' valoro de la poneo en tiu regiono. Montriĝis, ke ĝi estas osteca, subnutrita, kaj malvigla besto; sed ĝi ne aspektis baldaŭ mortonta. S-ro Buterburo mem pagis ĝin, kaj proponis al Gaja pluajn dek ok monerojn kiel iom da kompensaĵo por la perditaj bestoj. Li estis honestulo kaj bonstata laŭ la kriterioj en Brio, sed tridek arĝentaj moneroj serioze ĝenis lin, kaj trompado far Vilĉjo Filikĉjo igis tion eĉ pli netolerebla.

Efektive li malperdis en la fino. Montriĝis poste, ke nur unu ĉevalo estis efektive ŝtelita. La ceteraj estis forpelitaj aŭ forkuris terurite, kaj oni trovis ilin vagantaj en diversaj anguloj de Brilando. La poneoj de Gaja estis tute eskapintaj, kaj finfine (ĉar ili estis sufiĉe sagacaj) ili ĝisiris la Montetaron por serĉi Grasulon Pendolan. Do ili dum kelka tempo estis prizorgataj de Tom Bombadiljo kaj bonstatis. Sed kiam sciigo pri la okazaĵoj en Brio atingis la orelojn de Tom, tiu ekspedis ilin al s-ro Buterburo, kiu tiel akiris kvin bonajn bestojn je tre favora prezo. En Brio ili devis labori pli diligente, sed Bobo traktis ilin bone; do entute ili bonŝancis: ili malhavis vojaĝon malhelan kaj danĝeran. Sed ili neniam alvenis Rivendelon.

Tamen dume, laŭ la vidpunkto de s-ro Buterburo lia mono estis elspezita, ĉu bone ĉu malbone. Kaj li havis aliajn problemojn. Okazis granda tumulto, tuj kiam la ceteraj gastoj aperis kaj sciiĝis pri la rabatako kontraŭ la taverno. La sudaj vojaĝantoj perdis plurajn ĉevalojn kaj laŭte kulpigis la tavernestron, ĝis iĝis konate, ke unu el ilia propra grupo same malaperis dumnokte — kiu, se ne la straba kunulo de Vilĉjo Filikĉjo. Tiun suspekto tuj trafis.

— Se vi kunuliĝis kun ĉevalŝtelisto, kaj kondukis lin al mia domo, — diris Buterburo kolere, — vi devas mem pagi la tutan domaĝon, kaj ne venu kriantaj al mi. Iru demandi al Filikĉjo, kie troviĝas via belaspekta amiko! — Sed evidentiĝis, ke tiu estas nenies amiko, kaj neniu povis rememori, kiam li aliĝis al ilia grupo.

Post matenmanĝo, la hobitoj devis repaki kaj meti pliajn provizaĵojn por la pli longa vojaĝo, kiun ili nun atendis. Estis preskaŭ la deka horo, kiam finfine ili ekiris. Tiam la tuta Brio jam zumis pro ekscitiĝo. La malapera truko de Frodo; alveno de la Nigraj Rajdantoj; prirabo de la stalaro, kaj ne laste la informiĝo, ke Paŝegulo la disirulo aliĝis al la misteraj hobitoj, kreis tian rakonton, kia daŭris dum multaj seneventaj jaroj. La plimultaj loĝantoj de Brio kaj Transio, kaj multaj eĉ de Kavio kaj Arketo, amasiĝis sur la vojo por vidi la ekiron de l' vojaĝontoj. La ceteraj tavernaj gastoj staris ĉe la pordoj aŭ elpendis tra la fenestroj.

Paŝegulo ŝanĝis la intencon kaj decidis foriri el Brio laŭ la ĉefa vojo. Iu provo ekiri tuj trans la kamparon nur malplibonigus la situacion: duono el la loĝantaro sekvus ilin por vidi, kion ili celas, kaj malhelpi, ke ili senrajte trairu ien.

Ili adiaŭis al Nobo kaj Bobo kaj forlasis s-ron Buterburo kun multaj dankesprimoj.

— Mi esperas, ke ni renkontiĝos denove iam, kiam la aferoj denove gajos, — diris Frodo. — Nenio pli kontentigus min ol trankvila restado dum kelka tempo en via domo.

Ili formarŝis, zorgoplenaj kaj deprimitaj, rigardate de la amaso. Ne ĉiuj vizaĝoj estis amikecaj, nek ĉiuj el la alkriitaj vortoj. Sed Paŝegulo ŝajnis time admirata de la plimultaj brilandanoj, kaj tiuj, al kiuj li fiksrigardis, fermis la buŝon kaj retropaŝis. Li marŝis antaŭe kun Frodo, poste sekvis Gaja kaj Grinĉjo, kaj laste venis Sam kondukante la poneon, kiu estis ŝarĝita per tiom da pakaĵaro, kiom ilia bonvolo permesis; sed ĝi jam aspektis malpli deprimita, kvazaŭ ĝi aprobus la ŝanĝiĝon de sia sorto. Sam penseme maĉis pomon. Da tiuj li havis poŝplenon: adiaŭa donaco de Nobo kaj Bobo.

— Pomoj marŝante, kaj pipo sidante, — li diris. — Sed ŝajnas al mi, ke mankos al mi ambaŭ postnelonge.

La hobitoj malatentis la scivolajn kapojn, kiuj tragvatis pordojn aŭ ekaperis super muroj kaj bariloj, dum ili preterpasis. Sed kiam ili alproksimiĝis la pli foran pordon, Frodo vidis malhelan nezorgitan domon malantaŭ densa dornbarilo: la lastan domon de la vilaĝo. Post unu el la fenestroj li ekvidis flavecan vizaĝon kun ruzaj, oblikvaj okuloj, sed ĝi tuj malaperis.

"Do tie kaŝas sin tiu sudano! — li pensis. — Li aspektas pli ol duone goblena".

Trans la barilon alia viro fiksrigardis arogante. Li havis pezajn nigrajn brovojn kaj malhelajn senestimajn okulojn, lia buŝego kurbiĝis rikane. Li fumis mallongan nigran pipon. Kiam ili alproksimiĝis li elbuŝigis ĝin kaj

kraĉis.

— Matenon, Longkrurulo! — li diris. — Ĉu frua foriro? Finfine trovis amikojn? — Paŝegulo kapjesis, sed nenion respondis.

— Matenon, amiketoj! — li diris al la ceteraj. — Supozeble vi scias, al kiu vi kuniĝis? Tiu estas Senrezigna Paŝegulo. Kvankam mi aŭdis aliajn nomojn ne tiel agrablajn. Gardu vin hodiaŭ vespere! Kaj vi, Samĉjo, ne mistraktu mian povran maljunan poneon! Pa! — Li kraĉis denove.

Sam returniĝis rapide.

— Kaj vi, Filikĉjo, malaperigu vian malbelan vizaĝon, aŭ ĝi difektiĝos.

Per subita ekĵeto, fulme rapida, pomo forlasis lian manon kaj trafis Vilĉjon rekte sur la nazon. Li evitis tro malfrue, kaj de malantaŭ la dornbarilo aŭdiĝis sakroj.

— Malŝparo de bona pomo, — diris Sam bedaŭreme, kaj paŝis antaŭen.

Finfine ili lasis malantaŭe la vilaĝon. La akompanantaj infanoj kaj vaguloj, kiuj sekvis ilin, enuiĝis kaj returnis sin ĉe la Suda pordego. Trapasinte, ili daŭrigis laŭ la Vojo tra kelkaj mejloj. Ĝi kurbiĝis maldekstren, retroirante al sia orienta linio kiam ĝi ĉirkaŭis la subaĵon de Brimonteto, kaj poste ĝi ekdeklivis rapide malsupren en arbaretan regionon. Maldekstre ili povis vidi kelkajn el la domoj kaj hobit-truoj de Transio sur la malabruptaj flankoj de l' monteto; profunde en kavaĵo foraorde de la Vojo vidiĝis bukletoj da leviĝanta fumo, kiuj montris la situon de Kavio; Arketo estis kaŝita per la preteraj arboj.

Kiam la Vojo jam deklivis dum kelka distanco kaj postlasis Brimonteton starantan alta kaj bruna malantaŭe, ili alvenis mallarĝan padon, kiu forkondukis norden.

— Jen kie ni forlasas la senŝirmejon kaj ekiras kaŝe, — diris Paŝegulo.

— Espereble ne ia kurtvojo, — diris Grinĉjo. — Nia lasta kurtvojo tra la arbaro finiĝis preskaŭ katastrofe.

— Ha, sed tiam mi ne kuniris, — ridis Paŝegulo. — Miaj vojoj, ĉu kurtaj ĉu longaj, ne miskondukas. — Li rigardis ambaŭdirekten laŭ la Vojo. Neniu vidiĝis, kaj li rapide kondukis ilin suben al la arbokovrita valo.

Lia plano, kiom ili povis kompreni ĝin ne konante la terenon, estis iri unue direkte al Arketo, sed devii dekstren kaj preterpasi ĝin oriente, kaj poste direktiĝi laŭeble rekte trans Sovaĝujon ĝis Veterverta Monto.

Tiamaniere, se ĉio irus glate, ili fortranĉus grandan kurbiĝon de la Vojo, kiu pli fore turniĝis suden por eviti la Kulakvan Marĉon. Sed kompreneble ili mem devos trapasi la marĉon, kaj ties priskribo far Paŝegulo ne estis kuraĝiga.

Tamen dume la marŝado ne estis malagrabla. Efektive, se ne okazus la perturbaj eventoj de la pasinta nokto, ili ĝuus pli bone tiun ĉi parton de la

vojaĝo ol iun ajn ĝistiaman. La suno brilis, klare sed ne tro varme. La arboj en la valo havis ankoraŭ foliojn, estis kolorplenaj kaj ŝajnis trankvilaj kaj sanaj. Paŝegulo gvidis ilin senhezite inter la multaj kruciĝantaj padoj, kvankam sen lia ĉeesto ili baldaŭ estus malorientitaj. Li sekvis serpentuman direkton kun multaj turniĝoj kaj retroiroj, por trompi eventualan persekuton.

— Vilĉjo Filikĉjo certe gvatis, kie ni forlasis la Vojon, — li diris, — kvankam mi ne opinias, ke li mem sekvos nin. Li konas sufiĉe bone la terenon ĉi-regione, sed li scias, ke li ne estas mia egalulo en arbaro. Estas tio, kion li eble sciigos al aliaj, kio timigas min. Supozeble ili ne estas tre malproksimaj. Se ili supozas, ke ni celis al Arketo, tiom pli bone.

Ĉu pro la lerto de Paŝegulo aŭ pro alia kialo, ili nek vidis signon, nek aŭdis sonon de alia vivantaĵo dum la tuta tago: nek dupieda, krom birdoj; nek kvarpieda, krom unu vulpo kaj kelkaj sciuroj. La postan tagon ili komencis direktiĝi sendevie orienten; kaj ĉio daŭre estis kvieta kaj trankvila. Je la tria tago for de Brio ili forlasis la Ĉetarbaron. La tereno konstante malaltiĝis post kiam ili forturniĝis de la Vojo, kaj nun ili eniris larĝan ebenaĵon, pli malfacile trakteblan. Ili troviĝis tre malproksime de la limoj de Brilando, sur senpada sovaĝejo, kaj proksimiĝis al la Kulakva Marĉo.

La tero nun iĝis malseketa kaj foje spongeca, kaj ie-tie ili alvenis flakojn, kaj vastajn etendaĵojn da kanoj kaj junkoj plenaj je fajfado de kaŝitaj birdetoj. Ili devis tre zorge elekti paŝejojn por resti sekpiedaj kaj ĝustadirektaj. Komence ili progresis kontentige, sed ju pli ili antaŭeniris, des pli malrapida kaj pli danĝera iĝis la pasado. La marĉo estis konfuza kaj perfida, kaj ne ekzistis permanenta vojo trovebla eĉ de la disiruloj tra ĝiaj translokiĝantaj ŝlimejoj. Ekturmentis ilin muŝoj, kaj aero estis plenplena de nuboj da kuletoj, kiuj enrampis iliajn manikojn kaj iliajn hararojn.

— Mi estas manĝata vive! — kriis Grinĉjo. — Kulakvo! Estas pli da kuloj ol da akvo!

— Per kio ili nutras sin, kiam hobitoj ne haveblas? — demandis Sam, gratante sian nukon.

Ili pasigis tagon mizeran sur tiu soleca kaj malagrabla tereno. Ilia bivako estis malseketa, malvarma, kaj malkomforta, kaj la mordantaj insektoj ne lasis, ke ili dormu. Ĉeestis ankaŭ abomenindaj kreaĵoj, kiuj frekventis la junkojn kaj herbotufojn, kaj laŭsone estis misaj parencoj de griloj. Ili troviĝis milope, kaj ili en la tuta ĉirkaŭaĵo grincis, *nik-brik, brik-nik*, senĉese dum la tuta nokto, ĝis la hobitoj preskaŭ freneziĝis.

La posta tago, la kvara, ne estis multe pli bona, kaj la nokto preskaŭ same malkomforta. Kvankam la Nikbrikuloj (kiel nomis ilin Sam) estis postlasitaj, la kuloj daŭre persekutis ilin.

Dum Frodo kuŝis laca, tamen ne kapabla fermi la okulojn, al li ŝajnis, ke tre fore vidiĝis lumo sur la orienta ĉielo: ĝi ekfajris kaj malkreskis multfoje. Ne temis pri la aŭroro, ĉar tiu ne okazus dum ankoraŭ pluraj horoj.

— Kio estas la lumo? — li diris al Paŝegulo, kiu estis leviĝinta kaj staris rigardante antaŭen en la nokton.

— Mi ne scias, — Paŝegulo respondis. — Ĝi estas tro malproksima por rekoni. Ĝi similas al fulmo, kiu suprensaltas de la montosuproj.

Frodo rekuŝiĝis, sed li ankoraŭ longe vidis la blankajn flagrojn, kaj antaŭ ili la altan malhelan figuron de Paŝegulo, staranta silente kaj atente. Finfine li eniris maltrankvilan dormon.

Ili ne longe vojaĝis en la kvina tago, kiam ili postlasis la lastajn sporadajn flakojn kaj junkejojn de la marĉo. La tereno antaŭe denove ekdeklivis supren. En la malproksimo oriente ili nun vidis vicon da montetoj. La plej alta el ili troviĝis dekstre kaj iom dise de l' aliaj. Ĝi havis supron konusforman, iomete platan en la supro.

— Ĝi estas Veterverto, — diris Paŝegulo. — La Malnova Vojo, kiun ni postlasis fore dekstre, aliras ties sudon kaj preterpasas proksime de ĝia subo. Ni eble atingos ĝin morgaŭ tagmeze, se ni celos rekte al ĝi. Al mi ŝajnas, ke ni prefere tion faru.

— Kion vi aludas? — demandis Frodo.

— Mi aludas: kiam ni fakte alvenos, ne estas certe, kion ni trovos. Ĝi estas proksima al la Vojo.

— Sed ĉu ni ne esperas trovi tie Gandalfon?

— Jes, sed la espero estas malforta. Se li entute venos ĉi-direkten, li eble ne trapasos Brion, kaj do li eble ne scios, kion ni faras. Kaj ĉiuokaze, krom se ni bonŝance alvenos preskaŭ samtempe, ni maltrafos unu la alian; ne estos sekure por li aŭ por ni tro longe restadi tie. Se la Rajdantoj malsukcesos trovi nin en Sovaĝujo, ili verŝajne celos al Veterverto mem. Ĝi havigas larĝan ĉirkaŭvideblon. Efektive, en tiu ĉi tereno estas multaj birdoj kaj bestoj, kiuj kapablus vidi de la monteto nin starantajn ĉi tie. Ne ĉiuj birdoj estas fidindaj, kaj troviĝas aliaj spionoj pli misaj ol ili.

La hobitoj alrigardis zorgoplene la distajn montetojn. Sam rigardis supren al la pala ĉielo, timante vidi akcipitrojn aŭ aglojn ŝvebantaj super ili kun helaj neamikaj okuloj.

— Vi ja sentigas al mi solecon kaj malkomforton, Paŝegulo! — li diris.

— Kion vi konsilas? — demandis Frodo.

— Mi opinias, — respondis Paŝegulo malrapide, kvazaŭ ne tute certa, — mi opinias, ke prefere ni iru rekte orienten de ĉi tie kiom eble, cele al la montetovico, ne al Veterverto. Tie ni povos trafi padon, kiu laŭ mia scio pasas je ties subo; ĝi kondukos nin ĝis Veterverto el la nordo kaj malpli

videble. Poste ni vidos, kion ni vidos.

Ili plandadis la tutan tagon, ĝis malvarma kaj frua vespero. La tereno iĝis pli seka kaj pli dezerta; sed nebuletoj kaj vaporoj kuŝis malantaŭ ili ĉe la marĉo. Kelkaj melankoliaj birdoj pepis kaj ululis, ĝis la ronda ruĝa suno malrapide subiris en la okcidentajn ombrojn; poste estiĝis vaka silento. La hobitoj pensis pri la mola lumo de sunsubiro enrigardanta tra la gajaj fenestroj de malproksima Bag-Endo.

Je la tagofino ili alvenis rivereton, kiu serpentumis el la montetoj kaj perdiĝis en la stagna marĉtero, kaj ili ascendis laŭ ties bordoj dum sufiĉis la lumo. Jam noktiĝis, kiam fine ili haltis kaj noktumis sub kelkaj alnoj surborde de la rivereto. Antaŭe nun baŭmis kontraŭ la nigreta ĉielo la mornaj kaj senarbaj dorsoj de la montetoj. Tiunokte ili starigis vaĉon, kaj Paŝegulo, ŝajne, tute ne dormis. La luno estis kreska, kaj dum la fruaj noktaj horoj frida griza lumo surkuŝis la terenon.

La postan matenon ili ekiris denove baldaŭ post sunleviĝo. En la aero estis frosteco, kaj la ĉielo estis pale, klare blua. La hobitoj sentis sin refreŝigitaj, kvazaŭ ili pasigis nokton da dormo seninterrompa. Jam ili ekkutimiĝis al multe da marŝado kaj malmulte da manĝaĵo — pli malmulte, ĉiuokaze, ol tiom, kiom en la Provinco ili supozus sufiĉa por ebligi al ili stari surkrure. Grinĉjo deklaris, ke Frodo aspektas duoble pli bonstata ol antaŭe.

— Tre strange, — diris Frodo, striktigante sian zonon, — se oni pripensas, ke fakte da mi ekzistas konsiderinde malpli. Mi esperas, ke la maldikiĝado ne daŭros senfine, aŭ mi estiĝos fantomo.

— Ne parolu pri tiaj aferoj! — diris Paŝegulo rapide, kaj surprize serioze.

La montoj proksimiĝis. Ili formis ondantan spinon, kiu ofte leviĝis ĝis preskaŭ mil futoj, kaj ie-tie refalis al malaltaj fendoj aŭ trapasejoj kondukantaj al la orienta regiono. Sur la verto de la spino la hobitoj vidis ion, kio aspektis kiel restaĵoj de verdaĵkovritaj muroj kaj ŝtonbariloj, kaj en la fendoj ankoraŭ staris ruinoj de malnovaj ŝtonkonstruaĵoj. Je noktiĝo ili atingis la subon de l' okcidentaj deklivoj, kaj tie ili noktumis. Tio estis nokto de la kvina de oktobro, kaj ili estis je sestaga distanco de Brio.

Matene ili trovis, la unuan fojon de kiam ili forlasis Ĉetarbaron, klare videblan padon. Ili turniĝis dekstren kaj laŭiris ĝin suden. Ĝi direktiĝis ruze, sekvante linion, kiu ŝajnis elektita por laŭeble kaŝiĝi el videbleco, same de la montovertoj supre kaj de la platejoj okcidente. Ĝi plonĝis en valetojn kaj apudis apikajn teramasojn; kaj kie ĝi pasis trans tereno pli ebena kaj pli senŝirma, ambaŭflanke de ĝi troviĝis ŝtonegoj kaj ĉizitaj ŝtonoj, kiuj ekranis la vojaĝantojn preskaŭ kiel barilo.

— Mi scivolas, kiu faris ĉi tiun padon, kaj por kio, — diris Grinĉjo, dum ili promenis laŭ unu el tiuj avenuoj, kie la ŝtonoj estis pli ol kutime grandaj kaj kunmetitaj. — Mi ne certas, ke tio plaĉas al mi: ĝi havas — nu, aspekton iom dolmenulan. Ĉu troviĝas tumulo sur Veterverto?

— Ne. Ne estas tiuj sur Veterverto, nek sur iu ajn el ĉi tiuj montetoj, — respondis Paŝegulo. — La homoj de l' okcidento ne loĝis ĉi tie; kvankam dum siaj lastaj tagoj ili defendis la montetojn dum kelka tempo kontraŭ la malbonego, kiu alvenis el Angmaro. Ĉi tiu pado estis farita por servi la fortikaĵojn laŭlonge de la muroj. Sed pli antikve, dum la unuaj tagoj de la Norda Reĝlando, ili konstruis grandan vaĉturon supre de Veterverto, Amono Sulo ili nomis ĝin. Ĝi estis bruligita kaj rompita, kaj neniom el ĝi restas nun krom faligita ringo, kiel kruda krono sur la kapo de l' malnova monteto. Tamen iam ĝi estis alta kaj bela. Estas rakontite, ke tie staris Elendilo atendante la alvenon de Gil-Galado el la Okcidento, en la tagoj de la Lasta Alianco.

La hobitoj fiksrigardis al Paŝegulo. Montriĝis, ke li estas klera pri antikva saĝeco, kiel ankaŭ pri la moroj de la sovaĝejo.

— Kiu estis Gil-Galado? — demandis Gaja; sed Paŝegulo ne respondis, kaj ŝajnis droninta en pensado. Subite malalta voĉo murmuris:

Gil-Galad' estis elfa reĝo,
pri kiu tristas harp-arpeĝo:
la lasta el liberularo
inter la Montoj kaj la Maro.

La glavo longis, akris lanco,
la kasko brilis el distanco;
la steloj en ĉiela bildo
spegulis sin sur Ha ŝildo.

Li rajdis antaŭlonge for
al kaŝa lok', ĉar en Mordor',
la ombra, falis lia stelo
en tristan regnon de l' malhelo.

La aliaj turniĝis mirigite, ĉar ĝi estis la voĉo de Sam.

— Daŭrigu! — diris Gaja.

— Nur tion mi konas, — balbutis Sam, ruĝiĝante. — Mi lernis ĝin de s-ro Bilbo, kiam mi estis knabo. Li kutimis rakonti al mi tiajn historiojn, ĉar li sciis, ke mi ĉiam emis aŭdi pri elfoj. Estis s-ro Bilbo, kiu instruis al mi legadon kaj skribadon. Li estis tre klera, tiu kara maljuna s-ro Bilbo. Kaj li verkis *poezion*. Li verkis ĝuste tion, kion mi elparolis.

— Li ne verkis ĝin, — diris Paŝegulo. — Ĝi estas parto de tiu kanto, kiu titoliĝas *La Pereo de Gil-Galado*, kaj estas en la antikva lingvo. Bilbo verŝajne tradukis ĝin. Tion mi neniam sciis.

— Enestis multe pli, — diris Sam, — tute pri Mordoro. Tiun parton mi ne lernis, ĝi tremetigis min. Mi neniam supozis, ke mi mem iam laŭiros tiun vojon!

— Iros ĝis Mordoro! — kriis Grinĉjo. — Espereble tiel ne okazos!

— Ne elparolu tiel laŭte tiun nomon! — diris Paŝegulo.

Estis jam tagmeze, kiam ili proksimiĝis al la suda fino de la pado, kaj vidis antaŭ si, en la pala klara lumo de l' oktobra suno, grizverdan deklivon, kiu kvazaŭ ponto kondukis supren sur la nordan montodeklivon. Ili decidis tuj celi al la supro, dum la taga lumo estis hela. Sinkaŝado ne plu eblis, kaj ili povis nur esperi, ke neniu malamiko aŭ spiono observas ilin. Nenio vidiĝis moviĝanta sur la deklivo. Se Gandalfo estis ie en la ĉirkaŭaĵo, mankis signo pri li.

Sur la okcidenta flanko de Veterverto ili trovis ŝirmatan kavaĵon, funde de kiu estis bovloforma valeto kun herbaj flankoj. Tie ili lasis Samon kaj Grinĉjon kun la poneo kaj iliaj tornistroj kaj pakaĵoj. La aliaj tri plueniris. Post duonhoro da laciga grimpado Paŝegulo atingis la supron de la monteto; Frodo kaj Gaja sekvis, lacaj kaj senspiraj. La lasta deklivo estis apika kaj rokoplena.

Supre ili trovis, kiel Paŝegulo antaŭdiris, larĝan ringon de antikva ŝtonĉizaĵo, jam polviĝanta aŭ kovrita de antikva herbo. Sed en la centro amaso de rompitaj ŝtonoj estis staplita. Ili estis nigrigitaj, kvazaŭ per fajro. Ĉirkaŭe la razeno estis ĝisradike bruligita kaj ĉie interne de l' ringo la herbo estis brulstampita kaj ŝrumpinta, kvazaŭ flamoj inundus la montosupron, sed mankis ĉiu signo pri vivantaĵoj.

Starante rande de l' ruinigita cirklo, ili vidis ĉie ĉirkaŭe sube larĝan vidkampon, plejparte terojn malplenajn kaj nerimarkindajn, escepte de grupoj da arboj fore en la sudo, post kiuj ili ekvidis ie-tie ekbrilon de malproksima akvo. Sube de ili ĉe tiu suda flanko kuris rubande la Malnova Vojo, venante el la okcidento kaj serpentumante, ĝis ĝi malaperis malantaŭ spino da malhela tero oriente. Sur la Vojo nenio moviĝis. Okule sekvante ĝin orienten ili vidis la Montojn: la pli proksimaj montosuboj estis brunaj kaj sombraj; malantaŭ ili staris pli altaj formoj el grizo, kaj plue sekvis altaj blankaj montopintoj, kiuj glimis inter la nuboj.

— Nu, jen ni alvenis! — diris Gaja. — Kaj tre malagrable kaj forpuŝe ĝi aspektas! Mankas akvo kaj ŝirmaĵo. Kaj neniu indiko pri Gandalfo. Sed mi ne kulpigas lin pro tio, ke li ne atendis — se li entute venis ĉi tien.

— Pripensinde, — diris Paŝegulo, penseme ĉirkaŭrigardante. — Eĉ se li

malantaŭis nin du-tri tagojn ĉe Brio, li povus alveni ĉi tien la unua. Li kapablas rajdi tre rapide, kiam urĝas. — Subite li kliniĝis kaj rigardis la plej supran ŝtonon de la ŝtonamaso; ĝi estis pli plata ol la aliaj, kaj pli blanka, kvazaŭ ĝin maltrafis la fajro. Li prenis kaj esploris ĝin, turnante ĝin per la fingroj. — Ĝi estis mantuŝita lastatempe, — li diris. — Kion vi opinias pri ĉi tiuj signoj?

Sur la plata subaĵo Frodo vidis iujn grataĵojn:

ᛁᛋ ᛁᛁᛁ.

— ŝajnas, ke tio estas streko, punkto, kaj tri pliaj strekoj, — li diris.

— La maldekstra streko eble estas runo *G* kun maldikaj branĉoj, — diris Paŝegulo. — Ĝi povas esti signo postlasita de Gandalfo, kvankam oni ne povas esti certa. La grataĵoj estas fajnaj, kaj ili certe aspektas freŝaj. Sed la signoj eble signifas ion tute alian, kaj tute ne koncernas nin. Disiruloj uzas runojn, kaj ili kelkfoje venas ĉi tien.

— Kion ili povus signifi, eĉ se ilin faris Gandalfo? — demandis Gaja.

— Laŭ mia opinio, — respondis Paŝegulo, — ili signifas G 3, kaj estas indiko, ke Gandalfo estis ĉi tie la trian de oktobro: do jam antaŭ tri tagoj. Tio indikus ankaŭ, ke li hastis kaj danĝero minacis, tiel ke mankis al li tempo kaj li ne kuraĝis skribi ion pli longan aŭ pli klaran. Se estas tiel ni devas esti singardaj.

— Mi volus, ke ni estus certaj, ke faris la signojn li, kio ajn la signifo, — diris Frodo. — Estus tre konsole scii, ke li estas survoje, antaŭ ni aŭ malantaŭe.

— Eble, — diris Paŝegulo. — Persone, mi opinias, ke li estis ĉi tie, kaj danĝero minacis. Ĉi tie estis brulaj flamoj; kaj nun revenas al mia menso la lumo, kiun ni vidis antaŭ tri noktoj sur la orienta ĉielo. Mi konjektas, ke li estis atakata sur tiu ĉi montosupro, sed kiarezulte mi ne povas diveni. Li ne plu ĉeestas, kaj jam ni devas prizorgi nian vojaĝon al Rivendelo laŭ nia bontrovo.

— Kiom malproksima estas Rivendelo? — demandis Gaja, lace ĉirkaŭrigardante. La mondo aspektis sovaĝa kaj vasta desur Veterverto.

— Mi ne scias, ĉu la Vojo estas iam mejle mezurita post la *Forlasita Taverno*, je unutaga vojaĝo oriente de Brio, — respondis Paŝegulo. — Iuj diras, ke ĝi estas tiomdistanca, aliaj diras alie, Ĝi estas vojo stranga, kaj oni ĝojas alveni la finon, ĉu la daŭro estas longa, ĉu mallonga. Sed mi scias, kiom longe tio daŭrus por mi proprapaŝe, kun bela vetero kaj sen misfortuno: dek du tagoj de ĉi tie ĝis la transpasejo Bruineno, kie la Vojo transiras la Bruakvon, kiu fluas el Rivendelo. Antaŭ ni staras almenaŭ dusemajna vojaĝo, ĉar al mi ŝajnas, ke ni ne povos uzi la Vojon.

— Dusemajna! — diris Frodo. — Multo povas okazi dum tioma tempo.

— Povas, — diris Paŝegulo.

Ili staris kelkan tempon silente sur la montosupro, proksime al ties suda rando. En tiu soleca loko Frodo la unuan fojon plene konstatis sian senhejmecon kaj danĝeron. Li amare deziris, ke lia sorto lasus lin en la kvieta kaj amata Provinco. Li rigardis suben al la abomena Vojo, rekondukanta okcidenten — al lia hejmo. Subite li rimarkis, ke du nigraj makuletoj moviĝas malrapide sur ĝi de la okcidento; kaj rigardante denove li vidis, ke tri aliaj rampas de la oriento renkonte al ili. Li ekkriis kaj kroĉis la brakon de Paŝegulo.

— Rigardu, — li diris, fingromontrante suben.

Tuj Paŝegulo ĵetis sin surteren interne de l' ruina cirklo, subentrenante Frodon apude. Gaja ĵetiĝis najbare.

— Kio estas? — li flustris.

— Mi ne scias, sed mi timas la plej malbonan, — respondis Paŝegulo.

Malrapide ili alrampis denove la randon de l' ringo, kaj gvatis tra fendeto inter du akregaj ŝtonoj. La lumo ne plu helis, ĉar la mateno jam nebuliĝis, kaj nuboj malrapidantaj el la oriento jam atingis la sunon, dum tiu komencis subeniri. Ili ĉiuj povis vidi la nigrajn makuletojn, sed nek Frodo nek Gaja povis certe difini iliajn formojn; tamen io sciigis al ili, ke tie, malproksime sube, estis Nigraj Rajdantoj kuniĝantaj sur la Vojo ĉe la montopiedo.

— Jes, — diris Paŝegulo, kies pli akra vidkapablo ne lasis al li dubon. — La malamikoj estas ĉi tie!

Rapide ili forrampis kaj ŝteliris suben laŭ la norda flanko de la monteto por trovi siajn kunulojn.

Sam kaj Peregrino ne estintis pigraj. Ili esploris la valeton kaj la ĉirkaŭajn deklivojn. Ne tre fore ili trovis fonton de klara akvo sur la montoflanko, kaj proksime al ĝi spurojn ne pli ol unu-du tagojn aĝajn. En la valeto mem ili trovis postsignojn de fajro, kaj aliajn indikojn pri rapide starigita bivako. Troviĝis kelkaj falintaj rokoj rande de la valeto proksime al la deklivo. Malantaŭ ili Sam trovis malgrandan provizon da brulligno nete stakita.

— Mi scivolas, ĉu olda Gandalfo estis ĉi tie, — li diris al Grinĉjo. — Kiu ajn metis ĉi tien tiun provizaĵon verŝajne intencis reveni.

Paŝegulo tre interesiĝis pri tiuj trovaĵoj.

— Mi bedaŭras, ke mi ne atendis por esplori la teron ĉi-loke, — li diris, rapidante al la fonto por ekzameni la paŝspuron.

— Estas precize laŭ mia antaŭtimo, — li diris reveninte. — Sam kaj Grinĉjo tramplis la molan teron, kaj la spuroj estas viŝitaj aŭ konfuzitaj.

Disiruloj estis ĉi tie lastatempe. Ĝuste ili postlasis la brullignon. Sed vidiĝas ankaŭ pluraj spuroj pli novaj, kiujn ne lasis disiruloj. Minimume unu kompleto estas farita, antaŭ nur unu aŭ du tagoj, per pezaj botoj. Minimume unu. Mi jam ne povas esti certa, sed mi opinias, ke troviĝis multaj piedoj botvestitaj. — Li paŭzis kaj staris zorgoplene pensante.

Ĉiu el la hobitoj mense vidis bildon de la mantelvolvitaj kaj botvestitaj Rajdantoj. Se la Rajdantoj jam trovis la valeton, ju pli baldaŭ ke Paŝegulo forkonduku ilin, des plibone. Sam rigardis la valeton kun granda malŝato nun, sciiĝinte pri iliaj malamikoj sur la Vojo, nur kelkajn mejlojn for.

— Ĉu ni forrapidu, s-ro Paŝegulo? — li demandis senpacience. — Jam malfruiĝas, kaj al mi ne plaĉas tiu ĉi truo: ial ĝi deprimas min.

— Jes, ni certe devas tuj decidi, kion fari, — respondis Paŝegulo, rigardante supren kaj konsiderante la horon kaj la veteron. — Nu, Sam, — li diris fine, — ankaŭ al mi ne plaĉas tiu ĉi loko; sed mi ne sukcesas pensi pri loko pli bona atingebla antaŭ la noktiĝo. Almenaŭ ni estas momente nevideblaj, kaj se ni moviĝus, multe pli probable rimarkus nin spionoj. Nia sola ebleco estas tute devii de nia celvojo ree norden ĉi-flanke de la montetolinio, kie la tereno estas ĉie proksimume sama kiel ĉi tie. La Vojo estas gardata, sed ni devus transiri ĝin, se ni provus kaŝi nin en la sudaj densejoj. Norde de la Vojo trans la montetoj la tereno estas dum mejloj dezerta kaj ebena.

— Ĉu la Rajdantoj kapablas *vidi*? — demandis Gaja. — Mi volas diri, ke ili kutime ŝajnis uzi la nazon prefere ol la okulojn, flare serĉante nin, se flaro estas la ĝusta vorto, almenaŭ en la taglumo. Sed vi devigis nin kuŝiĝi teren, kiam vi vidis ilin sube; kaj nun vi parolas pri vidiĝo, se ni moviĝus.

— Mi estis tro malzorga sur la montosupro, — respondis Paŝegulo. — Mi tre deziris trovi ian indikon pri Gandalfo; sed estis erare supreniri triope kaj stari tiel longe tie. Ĉar la nigraj ĉevaloj kapablas vidi, kaj la Rajdantoj povas uzi homojn kaj aliajn kreitojn kiel spionojn, kiel ni konstatis en Brio. Ili mem ne vidas tiel la lumomondon kiel ni, sed niaj figuroj estigas ombrojn en iliaj mensoj, kiujn detruas nur la tagmeza suno; kaj en la mallumo ili perceptas multajn signojn kaj formojn, kiuj estas kaŝataj al ni: tiam ili estas plej timindaj. Kaj ĉiam ili flaras la sangon de vivantaĵoj, dezirante kaj malamegante ĝin. Ekzistas ankaŭ sentumoj krom vido aŭ flaro. Ni kapablas senti ilian ĉeeston — tiu ĝenis niajn korojn, tuj kiam ni alvenis ĉi tien, kaj antaŭ ol ni vidis ilin; pli akre ili sentas nian ĉeeston. Cetere, — li aldonis, kaj lia voĉo iĝis flustra, — la Ringo altiras ilin.

— Ĉu do troviĝas neniu ebleco eskapi? — diris Frodo, ĉirkaŭrigardante ekscitite. — Se mi moviĝos mi estos vidata kaj persekutata! Se mi restos mi

altiros ilin al mi!

Paŝegulo metis manon sur lian ŝultron.

— Espero restas, — li diris. — Vi ne estas sola. Ni taksu ĉi tiun brullignon prete metitan por la fajro kiel signon. Ĉi tie troviĝas malmulte da ŝirmo aŭ defendebleco, sed fajro servos nin ambaŭmaniere. Saŭrono kapablas uzi fajron por siaj hidaj celoj, kiel ĉion alian, sed tiuj Rajdantoj ne amas ĝin, kaj timas tiujn, kiuj regas ĝin. Fajro estas nia amiko en la sovaĝejo.

— Eble, — murmuris Sam. — Ĝi estas ankaŭ tiel bona maniero diri "jen ni estas", kiel mi povas imagi, escepte de kriado.

En la plej malalta kaj plej ŝirmata angulo de l' valeto ili bruligis fajron, kaj pretigis manĝaĵon. Vesperaj ombroj komencis surfali, kaj iĝis malvarme. Ili subite konstatis grandan malsaton, ĉar ili manĝis nenion post la matenmanĝo, sed ili ne kuraĝis pretigi vespermanĝon pli ol ŝpareman. La tereno antaŭ ili estis malplena je ĉio krom birdoj kaj bestoj, malsimpatia loko forlasita de ĉiuj gentoj de la mondo. Disiruloj iris de tempo al tempo tra la montetoj, sed ili estis malmultaj, kaj ne restis longe. Aliaj vagantoj estis maloftaj kaj malbonspecaj: troloj eble deviis kelkfoje el la nordaj valoj de la Nebulecaj Montoj. Nur sur la vojo troveblis vojaĝantoj, plejofte gnomoj, rapidantaj pri propraj aferoj, kaj sen disponebla helpo kaj kun malmultaj vortoj por nekonatoj.

— Mi ne vidas, kiel ni povas konservi nutraĵon ĝis la fino, — diris Frodo. — Ni sufiĉe atentis dum la lastaj kelkaj tagoj, kaj tiu ĉi vespermanĝo tute ne estas festo; sed ni foruzis pli ol ni devis, se restas ankoraŭ du semajnoj de l' vojaĝo, kaj eble pli.

— Ekzistas nutraĵo en la sovaĝejo, — diris Paŝegulo; — beroj, radikoj, kreskaĵoj; kaj mi sufiĉe lertas pri ĉasado se necese. Ne necesas timi malsatmorton antaŭ alveno de la vintro. Sed kolektado kaj kaptado de nutraĵo estas laboro longa kaj laciga, kaj al ni necesas rapido. Do striktigu la zonojn, kaj pensu pri la tabloj en la domo de Elrondo!

Iĝis pli malvarme kiam alvenis la mallumo. Elgvatante trans randon de la valeto, ili vidis nenion krom griza tereno jam malaperanta rapide en ombron. La ĉielo supre denove klariĝis kaj malrapide pleniĝis de ekbrilaj steloj. Frodo kaj liaj kunuloj kaŭris ĉirkaŭ la fajro, volvite per ĉiuj manteloj kaj lankovriloj posedataj de ili; sed Paŝegulo kontentiĝis per unu mantelo, kaj sidis iom aparte, sucante penseme sian pipon.

Dum noktiĝis, kaj la fajrolumo komencis hele disradii, li ekrakontis al ili historiojn por forturni iliajn pensojn de la timo. Li konis multajn historiojn kaj legendojn el la pratempo, pri elfoj kaj homoj kaj la bonaj kaj misaj faroj el la Praaj Tagoj. Ili scivolis, kiomaĝa li estas, kaj kie li lernis ĉi tutan

folkloron.

— Rakontu al ni pri Gil-Galado, — diris Gaja subite, kiam li paŭzis fine de rakonto pri la elfaj reĝlandoj. — Ĉu vi konas pli da tiu kanto, kiun vi aludis?

— Jes ja, — respondis Paŝegulo. — Scias ankaŭ Frodo, ĉar ĝi intime koncernas lin. — Gaja kaj Grinĉjo rigardis al Frodo, kiu fiksrigardis la fajron.

— Mi konas nur tiun etan parton, kiun rakontis al mi Gandalfo, — diris Frodo malrapide. — Gil-Galado estis la lasta el la grandaj elfaj reĝoj de Mez-Tero. Gil-Galado estas *Stellumo* en ilia lingvo. Kun Elendilo, elf-amiko, li iris al la lando...

— Ne! — diris Paŝegulo interrompante. — Mi opinias, ke tiu historio ne estu rakontata nun, kiam la servistoj de la Malamiko estas proksimaj. Se ni trabatiĝos ĝis la domo de Elrondo, vi rajtos aŭdi ĝin tie komplete.

— Do rakontu al ni iun alian historion pri la malnova tempo, — petegis Sam; — historion pri la elfoj en la tempo de ilia gloro. Al mi treege plaĉus aŭdi pli pri elfoj; la mallumo ŝajnas tiel strikte alpremiĝi.

— Mi rakontos al vi la historion pri Tinuviela, — diris Paŝegulo, — mallonge, ĉar ĝi estas rakonto longa, kies fino estas nekonata; kaj ekzistas neniu nun, escepte de Elrondo, kiu memoras ĝin ĝuste, kiel ĝi estis rakontita pratempe. Ĝi estas ferakonto, kvankam malĝoja, kiaj estas ĉiuj rakontoj de Mez-Tero, kaj tamen ĝi eble levos viajn korojn. — Li silentis dum kelka tempo, kaj poste li komencis ne paroli, sed ĉantadi mallaŭte:

Foliis, herbo verdkoloris,
konioj floris altgracie,
kaj lumo en arbara kalmo
de l’ steloj glime subenboris.
Tinuviela dancis tie
laŭ melodi’ de ia ŝalmo;
harare lumis steloj strie,
kaj pale sur la rob’ fosforis.

De l’ montoj venis nun Bereno
kaj vagis vane sub folioj,
kaj apud la river’ Elveno
promenis en solec’ kaj sombro.
Li elrigardis tra l’ konioj,
orflorojn vidis en soleno
sur ŝiaj vestaj flulinioj
kaj harojn spurajn kiel ombro.

Piedojn liajn sorĉ’ kuracis
devige vagajn sur la montoj,
kaj forta, vigla,for li hastis,
kroĉiĝis al lunlumo tenta.
Tra Elfalandaj arbaj rondoj
ŝi leĝerpaŝe fuĝe dands,
kaj lasis lin al sopir-ondoj
aŭskultan en arbar’ silenta.

Li aŭdis ofte sonon fuĝe
de piedfrap’ leĝere paŝa,
aŭ sub la ter’ muzikon muĝe
tremantan en kavaĵ’ sekreta.
Jam velkis koniaro maŝa,
kaj falis al la ter’ rifuĝe
la faga krono foliaĵa
dum vintro en arbar’ tremeta.

Li serĉis ŝin de jar’ al jaro,
trans foliar’ sternita tere
sub lun’ kaj stela radiaro
sur la ĉielo frostotrema.
Kvazaŭ sur montovert’ supere,
ŝi dancis en la luna klaro,
kaj sube dissterniĝis tere
arĝenta nebulet’ flirtema.

Postvintre venis ŝi denove,
printempon kante liberigis
laŭ pluvo kaj alaŭdo move,
akvo degela kaj bobeld.
La elfaj floroj resurtigis,
sopir’ inundis lin denove,
kaj kanti, danci, lin instigis
kun ŝi sur herbo senribela.

Ŝi fuĝis plu, sed li rapidis.
Tinuviel’! Tinuviela!
laŭ l’ elfa nom’ li ŝin alstridis
kaj ŝi aŭskulte tie haltis.
ŝi haltis: lia voĉo bela
sorĉis; Bereno alrapidis,

kaj cedis sin Tinuviela,
kaj ŝi en la brakum' ekzaltis.

Beren' l' okulojn enrigardis
sub ombro de hararo ŝia,
kaj vidis, kiel tie ardis
la stela lumo respegule.
Tinuviela, elf-gracia,
kiun la elfa saĝo gardis,
lin volvis per hararo sia
kaj li enbrakis arĝentbrule.

Ilin sur longa voj' destino
portis en frido de l' montaro,
tra haloj feraj, morna sino
de beladon-arbar' oblikve.
Disigis ilin Fenda Maro,
sed ili kunis en la fino,
kaj malaperis en l' arbaro,
kantante ĝoje, praantikve.

Paŝegulo suspiris kaj paŭzis antaŭ ol paroli denove.

— Tio estas kanto, — li diris, — en tiu modalo, kiu estas nomata *ann-thennath* inter la elfoj, sed estas malfacile prezenti ĝin per nia Komuna Lingvo, kaj tiu ĉi estas nur ĝia kruda eĥo. Ĝi rakontas pri la renkontiĝo de Bereno filo de Barahiro kaj Lutiena Tinuviela. Bereno estis mortemulo, sed Lutiena estis filino de Tingolo, Reĝo de elfoj sur la Mez-Tero, kiam la mondo estis juna; kaj ŝi estis la plej bela junulino, kiu iam ajn troviĝis inter ĉiuj infanoj de tiu ĉi mondo. Kiel la steloj super la nebuletoj de l' nordaj landoj estis ŝia beleco, kaj en ŝia vizaĝo estis brilanta lumo. En tiuj tagoj la Granda Malamiko, de kiu Saŭrono de Mordoro estis nura servisto, loĝis en Angbando en la nordo, kaj la elfoj de l' Okcidento reveninte al Mez-Tero militis kontraŭ li por reakiri la Silmarilojn, kiujn li ŝtelis; kaj la prapatroj de la homoj helpis la elfojn. Sed la Malamiko venkis kaj Barahiro estis mortigita, kaj Bereno, eskapinte tra danĝeregoj, venis trans la Montojn de Teruro en la kaŝitan reĝlandon de Tingolo en la arbaro Neldoredo. Tie li vidis Lutienan kantanta kaj dancanta en maldensejo apud la sorĉita rivero Esgalduino; kaj li nomis ŝin Tinuviela, tio estas Najtingalo en la lingvo de l' pratempo. Multaj malĝojaĵoj okazis al ili poste, kaj ili estis longe disigitaj. Tinuviela liberigis Berenon el la karceroj de Saŭrono, kaj kune ili travivis multajn gravajn danĝerojn, kaj detronigis eĉ la Grandan Malamikon, kaj prenis de ties fera krono unu el la tri Silmariloj, plej brilaj el ĉiuj juveloj,

por esti la kompensa donaco pro Lutiena al ŝia patro Tingolo. Tamen en la fino Bereno estis mortigita de la Lupego, kiu venis tra la pordoj de Angbando, kaj li mortis en la brakoj de Tinuviela. Sed ŝi elektis mortivecon kaj forlason de l' mondo, por povi sekvi lin; kaj laŭ la kanto, ili renkontiĝis denove trans la Fenda Maro, kaj post mallonga periodo de nova viva promenado en la verdaj arbaroj, kune ili pasis, antaŭlonge, el la limoj de tiu ĉi mondo. Tiel estas, ke Lutiena Tinuviela sola el la elfaro mortis efektive kaj forlasis la mondon, kaj ili perdis tiun, kiun ili plej amis. Sed post ŝi la deveno de la pratempaj elfestroj daŭris inter homoj. Ankoraŭ vivas tiuj, de kiuj Lutiena estis la prapatrino, kaj oni diras, ke ŝia posteularo neniam finiĝos. Elrondo de Rivendelo apartenas al tiu parenceco. Ĉar de Bereno kaj Lutiena naskiĝis Dioro, la heredonto de Tingolo; kaj de li Elvinga la Blanka kiun Erendilo edzinigis, kiu navigis sian ŝipon el la nebuletoj de la mondo sur la marojn de paradizo kun la Silmarilo sur sia frunto. Kaj de Erendilo devenis la Reĝoj de Numenoro, do Okcidentio.

Dum Paŝegulo parolis, ili rigardis lian strangan viglan vizaĝon, malhele lumigatan de l' ruĝa ardo de la ŝtipfajro. Liaj okuloj brilis, kaj lia voĉo estis profunda kaj riĉa. Super li estis nigra stelplena ĉielo. Subite aperis super la krono de Veterverto malantaŭ li pala lumo. La kreskanta luno grimpis malrapide super la monteton, kiu superombris ilin, kaj la steloj super la monteto fadis.

La historio finiĝis. La hobitoj moviĝis kaj sin streĉis.

— Vidu! — diris Gaja. — La Luno leviĝas: devas esti malfrue. La aliaj suprenrigardis. Ĝuste tion farante, ili vidis supre de l' monto ion etan kaj malhelan fone de la lunleviĝo. Tio eble estis nur ŝtonego aŭ elstaranta roko vidigita per la pala lumo.

Sam kaj Gaja stariĝis kaj foriris de la fajro. Frodo kaj Grinĉjo restis sidantaj en silento. Paŝegulo streĉe rigardis la lunlumon sur la monteto. Ĉio ŝajnis kvieta kaj senmova, sed Frodo sentis fridan timon enrampi en sian koron, kiam Paŝegulo jam ne parolis. Li kaŭris pli proksimen al la fajro. Tiumomente Sam revenis kurante de l' valeta rando.

— Mi ne scias pri kio temas, — li diris, — sed subite mi ektimis. Mi ne kuraĝus forlasi tiun ĉi valeton kontraŭ kiom ajn da mono; mi sentis, ke io alrampas laŭ la deklivo.

— Ĉu ion vi *vidis*? — demandis Frodo, salte stariĝante.

— Ne, sinjoro. Nenion mi vidis, sed mi ne restis por rigardi.

— Mi vidis ion, — diris Gaja; — aŭ tion mi supozis — forokcidente, kie la lunlumo surfalis la ebenaĵon post la ombro de la montetovertoj. Mi *pensis*, ke vidiĝis du aŭ tri nigraj figuroj. Ili ŝajnis moviĝi ĉi tien.

— Restu proksime al la fajro, kun la vizaĝoj al la ekstero! — kriis Paŝegulo, — Pretiĝu kun iuj pli longaj ŝtipoj en la manoj!

Senspire ili sidis tie kelkan tempon, silentaj kaj agopretaj, kun la dorsoj turnitaj al la ŝtipfajro, ĉiu rigardante en la ombrojn, kiuj ĉirkaŭis ilin. Nenio okazis. En la nokto estis nek sono nek moviĝo. Frodo ekmoviĝis, sentante ke li devas rompi la silenton: li sopiris krii laŭte.

— Ĉit! — flustris Paŝegulo.

— Kio estas tio? — elspiris Grinĉjo sammomente.

Trans la rando de la valeto, sur la flanko for de la monteto, ili pli sentis, ol vidis, unu aŭ kelkajn ombrojn leviĝi. Ili streĉis siajn okulojn, kaj la ombroj ŝajnis kreski. Baldaŭ ne plu estis dubeble: tri aŭ kvar altaj nigraj figuroj staris tie sur la deklivo, rigardante al ili. Tiel nigraj ili estis, ke ili ŝajnis nigraj truoj en la profunda ombro malantaŭ ili. Al Frodo ŝajnis, ke li aŭdis mallaŭtan siblon, kvazaŭ de venena spiro, kaj sentis maldensan trapikan frostiĝon. Poste la figuroj malrapide paŝis antaŭen.

Timego venkis Grinĉjon kaj Gajan, kaj ili ĵetis sin plate sur la teron. Sam retiris sin al la flanko de Frodo. Frodo apenaŭ malpli timegis ol la kunuloj; li tremegis kvazaŭ li treege frostus, sed lian timon superis subita tento surmeti la Ringon. La deziro tion fari ekkaptis lin, kaj li povis pensi pri nenio alia. Li ne forgesis pri la dolmenuloj, nek pri la mesaĝo de Gandalfo; sed io ŝajnis devigi lin malatenti ĉiujn avertojn, kaj li sopiris cedi. Ne pro espero pri eskapo, nek pro ia agado, ĉu bona ĉu malbona: li simple sentis, ke li devas preni la Ringon kaj surfingrigi ĝin. Li ne povis paroli. Li sentis, ke Sam rigardas lin, kvazaŭ li scius, ke la mastro spertas ian zorgegon, sed li ne povis turniĝi al li. Li fermis siajn okulojn kaj baraktis dum kelka tempo; sed rezisto iĝis netolerebla, kaj fine li eltiris malrapide la ĉeneton, kaj ŝovis la Ringon sur la montrofingron de sia maldekstra mano.

Tuj, kvankam ĉio alia restis kiel antaŭe malklara kaj malhela, la figuroj iĝis terure klaraj. Li povis vidi sub iliajn nigrajn volvaĵojn. Estis kvin altaj figuroj: du starantaj rande de la valeto, tri alvenantaj. Sur iliaj blankaj vizaĝoj brulis akraj senkompataj okuloj; sub iliaj manteloj estis longaj grizaj

roboj; sur iliaj grizaj haroj estis kaskoj el arĝento; en iliaj ostecaj manoj estis glavoj ŝtalaj. Iliaj okuloj trafis kaj trapikis lin, kaj ili alkuris al li. Senespere li elingigis la propran glavon, kaj al li ŝajnis, ke ĝi flagras ruĝe, kvazaŭ ĝi estus incendiilo. Du figuroj haltis. La tria estis pli alta ol la aliaj; liaj haroj estis longaj kaj brilantaj kaj sur lia kasko estis krono. Per unu mano li tenis longan glavon, kaj per la alia ponardon. La ponardo kaj la mano tenanta ĝin ardis je pala lumo. Li saltis antaŭen kaj alkuris Frodon.

Tiumomente Frodo ĵetis sin antaŭen sur la tero, kaj li aŭdis sin krii laŭte: “Ho Elberet’! Giltoniel’!” Samtempe li frapis al la piedoj de sia malamiko. Akra krio sonoris en la nokto; kaj li sentis doloron kvazaŭ sageto da venenita glacio trapikus lian maldekstran ŝultron. Svenante li ekvidis Paŝegulon saltanta el la mallumo kun flamanta brulligno en ambaŭ manoj. Per lasta fortostreĉo Frodo defingrigis la Ringon kaj fermis tenace ĉirkaŭ ĝin sian dekstran manon.

12

Fuĝo al Transpasejo

Kiam Frodo rekonsciiĝis li ankoraŭ tenegis furioze la Ringon. Li estis kuŝanta apud la fajro, kiu nun estis alte amasigita kaj brile brulanta. Liaj tri kunuloj kliniĝis al li.

— Kio okazis? Kie estas la pala reĝo? — li demandis frenezece. Ili estis tro feliĉaj aŭdinte lin paroli por tuj respondi; ili ankaŭ ne komprenis lian demandon. Fine li sciiĝis de Sam, ke ili vidis nenion krom la svagajn ombrecajn figurojn venintajn al ili. Subite, terurite, Sam rimarkis, ke lia mastro malaperis; kaj sammomente preterkuregis lin nigra ombraĵo, kaj li falis. Li aŭdis la voĉon de Frodo, sed ĝi ŝajnis alveni de tre malproksime, aŭ de sub la tero, kriante strangajn vortojn. Ili vidis nenion pli, ĝis ili falpuŝiĝis kontraŭ la korpo de Frodo, kuŝanta kvazaŭ mortinto vizaĝalherbe. Paŝegulo ordonis, ke ili levu lin kaj kuŝigu proksime al la fajro, kaj poste li malaperis. Tio okazis jam antaŭ sufiĉe longe.

Sam evidente komencis denove dubi pri Paŝegulo; sed dum ili parolis tiu aperis subite el la ombroj. Ili timtikis, kaj Sam elingigis sian glavon kaj ekstaris super Frodo; sed Paŝegulo surgenuiĝis rapide ĉe lia flanko.

— Mi ne estas Nigra Rajdanto, Sam, — li diris milde, — nek kunligita kun ili. Mi klopodis ion eltrovi pri iliaj moviĝoj, sed mi trovis nenion. Mi ne komprenas, kial ili foriris kaj ne atakas denove. Sed mankas ĉia sento pri ilia ĉeesto en la proksimeco.

Kiam li aŭdis tion, kion Frodo povis rakonti, li konsterniĝis plene, skuis la kapon kaj suspiris. Poste li ordonis, ke Grinĉjo kaj Gaja varmigu tiom da akvo kiom eblis per iliaj kaldronetoj, kaj lavu per ĝi la vundon.

— Hejtu daŭre la fajron, kaj varmigu senĉese Frodon! — li diris. Poste li stariĝis, forpaŝis kaj alvokis al si Samon. — Verŝajne mi komprenas jam pli bone la aferon, — li diris per mallaŭta voĉo. — Ŝajnas, ke ĉeestis nur kvin malamikoj. Kial ne ĉiuj ĉeestas, mi ne scias, sed mi pensas, ke ili ne atendis reziston. Ili provizore retroiris. Sed mi timas, ke ne tre foren. Ili revenos en alia nokto, se ni ne sukcesos eskapi. Ili atendas nur, ĉar ili supozas sian celon preskaŭ plenumita, kaj ke la Ringo ne povos multe pli foren fuĝi. Mi timas, Sam, ke ili supozas, ke via mastro ricevis venenan vundon, kiu subigos lin al ilia deziro. Ni vidos!

Sam larmsingultis.

— Ne malesperu! — diris Paŝegulo. — Nun vi devas fidi al mi. Via Frodo estas pli fortike konstruita ol mi divenis, kvankam Gandalfo sugestis, ke verŝajne tiel pruviĝos. Li ne estas mortigita, kaj mi opinias, ke li rezistos la mispotencon de la vundo pli longe ol liaj malamikoj atendas. Mi faros ĉion eblan por lin helpi kaj kuraci. Gardu lin zorge, dum mi forestos! — Li forrapidis kaj denove malaperis en la mallumon.

Frodo dormetis, kvankam la doloro de l' vundo lante pliiĝis, kaj venena frido disvastiĝis de lia ŝultro ĝis la brako kaj flanko. Liaj amikoj prizorgis lin, varmigante lin kaj banante lian vundon. La nokto pasis malrapide kaj treniĝe. Aŭroro kreskis sur la ĉielo, kaj la valeto pleniĝadis je griza lumo, kiam Paŝegulo fine revenis.

— Vidu! — li kriis; kaj kliniĝinte li levis de la tero nigran mantelon, kiu kuŝis tie kaŝite de la mallumo. Je unu futo super la suba orlo vidiĝis tratranĉo. — Tion kaŭzis la bato per la glavo de Frodo. La sola domaĝo kaŭzita al lia malamiko, mi timas; ĉar ĝi estas netuŝita, kaj pereas ĉiuj klingoj, kiuj trapikas tiun teruran Reĝon. Pli minaca al li estis la nomo Elbereta. Kaj pli minaca al Frodo estis tiu ĉi!

Li kliniĝis denove kaj levis longan maldikan ponardon. En ĝi estis frida brilo. Kiam Paŝegulo levis ĝin, ili vidis, ke proksime al la fino ĝia eĝo estis noĉita, kaj la pinto estis forrompita. Sed ĝuste kiam li alte tenis ĝin en la kreskanta lumo, ili rigardis mirigite, ĉar la klingo ŝajnis fandiĝi, kaj malaperis kiel fumo en la aero, lasante en la mano de Paŝegulo nur la tenilon.

— Ve! — li kriis. — Estis tiu ĉi malbenita ponardo, kiu kaŭzis la vundon. Malmultaj nuntempe posedas la lerton pri kuracado por kontraŭefiki tiajn fiarmilojn. Sed mi faros, kion mi povos.

Li sidigis sin sur la teron kaj, preninte la ponardotenilon, kuŝigis ĝin sur siajn genuojn, kaj li kantis super ĝi kanton malrapidan en stranga lingvo. Poste li metis ĝin flanken, turnis sin al Frodo, kaj per mallaŭta tono parolis vortojn, kiujn la aliaj ne distingis. El la saketo ĉe sia zono li elprenis longajn foliojn de ia kreskaĵo.

— Por trovi tiujn ĉi foliojn, — li diris, — mi longe marŝis, ĉar tiu ĉi planto ne kreskas sur la dezertaj montetoj; sed en densejoj sude de la Vojo mi trovis ĝin en la mallumo pro la parfumo de ĝiaj folioj. — Li premĉifis folion per siaj fingroj, kaj ĝi eligis dolĉan kaj pikan odoron. — Estas bonŝance, ke mi sukcesis trovi ĝin, ĉar ĝi estas kuraca planto, kiun la homoj el Okcidentio kunportis al Mez-Tero. *Atelaso* ili nomis ĝin, kaj nun ĝi kreskas nur malabunde kaj nur proksime al lokoj, kie ili loĝis aŭ kampadis pratempe; kaj ĝi ne estas konata en la Nordo, krom al kelkaj el tiuj, kiuj travagas Sovaĝujon. Ĝi havas gravajn ecojn, sed ĝia kuracpovo je tia ĉi

vundo eble estos malgranda.

Li ĵetis la foliojn en bolantan akvon kaj lavis la vunditan ŝultron de Frodo. La bonodoro de l' vaporo estis refreŝiga, kaj la nevunditoj sentis en la mensoj trankviliĝon kaj klarecon. La planto havis ankaŭ iom da bonefiko al la vundo, ĉar Frodo sentis malpliiĝi la doloron kaj ankaŭ la fridecon en sia flanko; sed lia brako ne reviviĝis, kaj li ne kapablis levi aŭ uzi la manon. Li profunde bedaŭris sian stultecon, kaj sin riproĉis pro malforteco de la volo; ĉar nun li konstatis, ke surmetante la Ringon li obeis ne la propran deziron sed la ordonan deziron de siaj malamikoj. Li scivolis, ĉu li restos dumvive kripligita, kaj kiel ili sukcesos daŭrigi la vojaĝon. Li sentis sin tro malforta por stariĝi.

Ĝuste tiun demandon diskutis la aliaj. Ili rapide decidis foriri laŭeble baldaŭ el Veterverto.

— Mi nun opinias, — diris Paŝegulo, — ke la malamikoj gvatis tiun ĉi lokon jam de kelkaj tagoj. Se Gandalfo efektive venis ĉi tien, li do nepre estis devigata forrajdi, kaj li ne revenos. Ĉiuokaze ni estos grave endanĝerigitaj ĉi tie post la noktiĝo, post la atako en la hieraŭa vespero, kaj apenaŭ eblas, ke ni trafos danĝeron pli grandan, kien ajn ni iros.

Tuj kiam la taglumo estis plena, ili rapide manĝis kaj pakis. Estis neeble, ke Frodo marŝu, do ili dispartigis la plimulton el sia portaĵo inter la kvaropo, kaj surponeigis Frodon. Dum la lastaj kelkaj tagoj la kompatinda besto mirinde bonfartiĝis; ĝi jam aspektis pli grasa kaj pli forta, kaj komencis vidigi amon al siaj novaj mastroj, precipe al Sam. La traktado far Vilĉjo Filikĉjo certe estis tre malbona, se la vojaĝo en Sovaĝujo ŝajnis al ĝi pli agrabla ol la antaŭa sorto.

Ili ekiris laŭ direkto suda. Tio devigus transiri la Vojon, sed ĝi estis la plej rapida vojo al tereno pli arbohava. Kaj ili bezonis brulaĵon, ĉar Paŝegulo diris, ke Frodo devas esti daŭre varmigata, precipe nokte, kaj fajro iom protektus ilin ĉiujn. Li ankaŭ planis mallongigi la vojaĝon per transiro de alia kurbiĝego de la Vojo: oriente post Veterverto ĝi ŝanĝis la direkton kaj larĝe kurbiĝis norden.

Ili malrapide kaj singarde ĉirkaŭiris la sud-okcidentajn deklivojn de l' monteto, kaj venis post kelka tempo ĝis la rando de la Vojo. Mankis indikoj pri la Rajdantoj. Sed ĝuste kiam ili rapidis transen, ili aŭdis malproksime du kriojn: frida voĉo kriis, kaj frida voĉo respondis. Tremante ili saltis antaŭen kaj celis la densejojn, kiuj troviĝis antaŭe. La tereno antaŭ ili deklivis al la sudo, sed ĝi estis sovaĝa kaj senvoja; arbustoj kaj nealtaj arboj kreskis en densaj grupiĝoj kun larĝaj dezertaj spacoj inter ili. La herbo estas malabunda, malfajna kaj griza; kaj la folioj en la densejoj estis palaj kaj falaj. Ĝi estis tereno senĝoja, kaj la vojaĝo estis malrapida kaj morna. Ili

parolis malmulte dum la paŝado. La koro de Frodo iĝis malgaja, kiam li rigardis ilin marŝantajn apud li kun la kapoj pendantaj kaj la dorsoj kurbigitaj sub la ŝarĝoj. Eĉ Paŝegulo ŝajnis laca kaj pezkora.

Antaŭ ol finiĝis la marŝado de l' unua tago la doloro de Frodo pliiĝis, sed tion li longe ne priparolis. Kvar tagoj pasis, sen multa ŝanĝiĝo de la tereno aŭ la pejzaĝo, krom ke malantaŭ ili Veterverto iom post iom malaltiĝis, kaj antaŭe la malproksimaj montoj baŭmis pli proksime. Tamen post tiu dista krio ili ne vidis nek aŭdis indikon, ke la malamikoj rimarkis ilian fuĝon aŭ persekutas ilin. Ili antaŭtimis la horojn mallumajn, kaj vaĉis duope dum la nokto, ĉiumomente atendante ekvidi nigrajn figurojn avancantaj en la griza nokto, malhele lumigata de la nubvualita lumo; sed ili vidis nenion, kaj aŭdis neniun sonon escepte de la susuro de velkaj folioj kaj herbo. Eĉ unufoje ili ne havis tiun senton de ĉeesta miseco, kiu alfluis ilin antaŭ la atako en la valeto. Ŝajnis tro optimisme esperi, ke la Rajdantoj denove maltrafis la spuron. Eble ili atendis por iel embuski en loko mallarĝa?

Fine de l' kvina tago la tereno komencis denove plialtiĝi malrapide el la larĝa malprofunda valo en kiun ili estis descendintaj. Paŝegulo nun direktis ilin nord-orienten, kaj en la sesa tago ili atingis la supron de longa malrapide altiĝanta deklivo, kaj vidis malproksime antaŭe grupon de arbokovritaj montetoj. Fore sub ili, ili povis vidi la Vojon ĉirkaŭantan la montetosubon; kaj dekstre rivero griza ekbrilis pale en la maldensa sunlumo. Malproksime ili ekvidis ankoraŭ alian riveron en ŝtona valo duone nebuletvualita.

— Mi timas, ke ĉi tie ni devos reiri al la Vojo por kelka tempo, — diris Paŝegulo. — Ni verŝajne alvenis la riveron Prujnelo, kiun la elfoj nomas Miteitelo. Ĝi fluas el Etenerikejoj, la trol-altaĵoj norde de Rivendelo, kaj aliĝas al Bruakvo fore en la sudo. Iuj nomas ĝin la Grizinundo post tio. Ĝi estas granda rivero antaŭ ol trafi la maron. Ne estas transirejo sub ĝiaj fontoj en Etenerikejoj, krom la Lasta Ponto, per kiu la Vojo transiras.

— Kiu estas tiu alia rivero, kiun ni vidas tie malproksime? — demandis Gaja.

— Tiu estas Bruakvo, la Bruineno apud Rivendelo, — respondis Paŝegulo. — La Vojo iras laŭlonge de montetoj tra multaj mejloj de la Ponto ĝis la Transpasejo de Bruineno. Sed mi ankoraŭ ne elpensis, kiel ni transiru la akvon. Unu rivero en unu fojo! Ni estos ja bonŝancaj, se ni ne trovos, ke la Lasta Ponto estas gardata kontraŭ nin.

La postan tagon, frue en la mateno, ili denove iris suben al la rando de la Vojo. Sam kaj Paŝegulo iris antaŭen, sed ili trovis neniun indikon pri iuj vojaĝantoj aŭ rajdantoj. Ĉi tie sub ombro de la montetoj estintis iom da

pluvo. Paŝegulo taksis, ke ĝi falis antaŭ du tagoj, kaj forlavis ĉiujn piedspurojn. Post tio pasis neniu rajdanto, laŭ lia prijuĝo.

Ili pluiris laŭeble rapide, kaj post unu-du mejloj ili vidis antaŭ si la Lastan Ponton, sube de mallonga apika deklivo. Ili antaŭtimis vidi nigrajn figurojn tie atendantajn, sed neniun ili rimarkis. Paŝegulo igis ilin kaŝiĝi en densejo apud la Vojo, dum li antaŭeniris por esplori. Postnelonge li revenis rapidante.

— Mi vidas neniun signon pri la malamikoj, — li diris, — kaj mi tre scivolas, kion signifas tio. Sed mi trovis ion tre strangan.

Li etendis sian manon, kaj montris palverdan juvelon.

— Mi ĝin trovis en la koto meze de la Ponto, — li diris. — Ĝi estas berilo, elf-gemo. Ĉu ĝi estis tie metita, aŭ hazarde faligita, mi ne scias, sed ĝi alportas al ni esperon. Mi taksas ĝin signo, ke ni povas transpasi la Ponton; sed post ĝi mi ne riskos resti sur la Vojo, manke de ia pli klara signo.

Tuj ili pluiris. Ili transiris sendanĝere la Ponton, aŭdante neniun sonon krom la akvo kirliĝanta kontraŭ ĝiaj tri grandaj arkaĵoj. Je unu mejlo poste ili alvenis mallarĝan ravinon, kiu kondukis norden tra la apika tereno maldekstre de l' Vojo. Tie Paŝegulo turniĝis flanken, kaj baldaŭ ili vagis en sombra loko de malhelaj arboj serpentumantaj ĉe la piedoj de malbonvenigaj montetoj.

La hobitoj ĝojis postlasi la malgajajn terenojn kaj la danĝeran Vojon; sed tiu ĉi nova loko ŝajnis minaca kaj neamika. Dum ili pluiris, la ĉirkaŭaj montetoj iom post iom altiĝis. Ie-tie sur altaĵoj kaj firstoj ili ekvidis antikvajn ŝtonmurojn kaj ruinaĵojn de turoj: tiuj aspektis malbonaŭgure. Frodo, kiu ne marŝis, disponis tempon por rigardadi antaŭen kaj pensadi. Li rememoris la rakonton de Bilbo pri ties vojaĝo kaj la minacantaj turoj sur la montetoj norde de l' Vojo, en la tereno proksime al la trola arbaro, kie okazis lia unua grava aventuro. Frodo konjektis, ke ili nun troviĝas en tiu sama regiono, kaj scivolis, ĉu hazarde ili pasos proksime al tiu loko.

— Kiu loĝas en tiu ĉi regiono? — li demandis. — Kaj kiu konstruis tiujn turojn? Ĉu ĝi estas trola lando?

— Ne! — diris Paŝegulo. — Troloj ne konstruas. Neniu loĝas en tiu ĉi lando. Iam homoj loĝis ĉi tie, antaŭlonge; sed jam neniu restas. Ili iĝis popolo misa, laŭ la legendoj, ĉar ili falis sub la ombron de Angmaro. Sed ĉiuj estis detruitaj dum la milito, kiu kondukis al la fino la Nordan Reĝlandon. Sed tio okazis tiel prae, ke la montetoj forgesis ilin, kvankam ombro ankoraŭ surkuŝas la landon.

— Kie vi lernis tiajn rakontojn, se la tuta tereno estas malplena kaj forgesema? — demandis Grinĉjo. — La birdoj kaj bestoj ne rakontas tiajn

historiojn.

— La posteuloj de Elendilo ne forgesas la tutan pasintaĵon, — diris Paŝegulo, — kaj multe pli ol mi kapablas rakonti estas memorata en Rivendelo.

— Ĉu vi estis ofte en Rivendelo? — diris Frodo.

— Ofte, — diris Paŝegulo. — Iam mi loĝis tie, kaj daŭre mi revenas, kiam tio estas ebla. Tie troviĝas mia koro, sed ne estas mia sorto sidi trankvile eĉ en la bela domo de Elrondo.

La montetoj nun komencis ĉirkaŭbari ilin. La Vojo kurbiĝis denove al la Rivero, sed ambaŭ jam estis forkaŝitaj de la vido. La vojaĝantoj eniris longan valon — mallarĝan, profunde fenditan, malhelan kaj silentan. Arboj kun malnovaj kaj torditaj radikoj pendis de klifoj, kaj amasiĝis malantaŭe kiel altiĝantaj deklivoj da pinoj.

La hobitoj ege laciĝis. Ili iris malrapide, ĉar ili devis trovi vojon tra senpada tereno, malhelpate de falintaj arboj kaj faligitaj rokoj. Laŭeble longe, pro Frodo, ili evitis grimpadon, ankaŭ ĉar estis fakte malfacile trovi iun ajn eblecon supreniri el la mallarĝaj valetoj.

Ili jam pasigis du tagojn en tiu tereno, kiam la vetero iĝis pluva. La vento komencis blovi konstante el la okcidento kaj verŝi la akvon de la malproksimaj maroj sur la malhelajn kapojn de l' montetoj kiel fajnan saturan pluvon. Vespere ili ĉiuj estis tramalsekaj, kaj la noktumado estis senĝoja, ĉar ili ne sukcesis bruligi fajron.

La postan tagon la montetoj leviĝis pli alte kaj apike antaŭ ili, kaj ili estis devigataj turniĝi norden for de la celo. Paŝegulo ŝajnis iĝi zorgoplena: ili estis jam preskaŭ dek tagojn for de Veterverto, kaj ilia stoko da provizaĵoj komencis malmultiĝi. La pluvo daŭris.

Tiun nokton ili pasigis sur ŝtonbreto kun roka muro malantaŭ ili, en kiu estis malprofunda kaverno, nura ĉerpo el la klifo. Frodo estis senripoza. La malvarmo kaj la malseko eĉ pli dolorigis lian vundon, kaj la doloro kaj sento de mortiga frido tute forpelis dormon. Li kuŝis tikante kaj turniĝante kaj aŭskultante timeme la ŝtelmanierajn noktobruojn: vento tra rokfendetoj, akvogutado, krako, subita klaka falo de ŝtono malkroĉiĝinta. Li sentis, ke nigraj figuroj alvenas por sufoki lin; sed kiam li eksidis, li vidis nenion krom la dorson de Paŝegulo, kiu kaŭris side, fumante sian pipon kaj vaĉante. Li kuŝiĝis denove kaj eniris maltrankvilan sonĝon, en kiu li promenis sur sia razeno en la Provinco, sed tio ŝajnis malklara kaj malhela, malpli klara ol la altaj nigraj ombroj, kiuj staris rigardante trans la dornbarilon.

Matene li vekiĝis kaj konstatis, ke la pluvo ĉesis. La nuboj ankoraŭ densis, sed ili diseriĝis, kaj palaj bluaj strioj aperis inter ili. La vento denove ŝanĝis direkton. Ne frue ili ekiris. Tuj post ilia malvarma kaj senkomforta

matenmanĝo Paŝegulo foriris sola, ordoninte ke la aliaj restu sub ŝirmo de la klifo, ĝis li revenos. Li intencis suprengrimpi, se eble, kaj ekrigardi la konturojn de l' tereno.

Reveninte li ne estis trankviliga.

— Ni venis tro multe norden, — li diris, — kaj ni devas trovi rimedojn turniĝi denove suden. Se ni pluiros ĉi-direkten ni trafos en la Etenerikejojn fornorde de Rivendelo. Tiu estas trola teritorio, malmulte konata al mi. Ni eble sukcesus trairi kaj atingi Rivendelon de la nordo; sed tio postulus tro multe da tempo, kaj nia nutraĵo ne sufiĉus. Do iel aŭ aliel ni devas trovi la Transpasejon de Bruineno.

La restaĵon de tiu tago ili pasigis stumblante trans rokan terenon. Ili trovis pasejon inter du montetoj, kiu kondukis ilin en valon direktiĝantan sud-orienten, la direkton, kiun ili volis iri; sed proksime al la tagofino ili trovis, ke la vojon baras denove alta verto, kies malhela eĝo estis disrompita je multaj nudaj pintoj kiel dentoj de malakrigita segilo. Ilia elekto estis reiri aŭ transgrimpi.

Ili decidis provi la grimpadon, sed ĝi pruviĝis tre malfacila. Postnelonge Frodo devis elseliĝi kaj pluldopodi surpiede. Eĉ tiel ili ofte malesperis suprenigi la ponean, aŭ efektive trovi irejon por si tiel ŝarĝite. La lumo preskaŭ malaperis, kaj ili estis ĉiuj elĉerpitaj, kiam fine ili alvenis la supron. Ili estis grimpintaj sur mallarĝan rokselon inter du pli altaj lokoj, kaj la tereno denove descendis apike, nur mallongan distancon antaŭe. Frodo subenĵetis sin, kaj kuŝis tremetante sur la tero. Lia maldekstra brako estis senviva, kaj liaj flanko kaj ŝultro sentiĝis kvazaŭ ilin surkuŝus glaciecaj ungegoj. La arboj kaj rokoj ĉirkaŭ li aspektis ombrecaj kaj malbrilaj.

— Ni ne povas iri plu, — diris Gaja al Paŝegulo. — Mi timas, ke tio ĉi elĉerpis Frodon. Mi terure zorgas pri li. Kion ni faru? Ĉu vi supozas, ke ili kapablos lin kuraci en Rivendelo, se ni iam alvenos tien?

— Ni vidos, — respondis Paŝegulo. — Nenion pli mi povas fari en la sovaĝejo; kaj ĉefe pro lia vundo mi tiom deziras persisti. Sed mi konsentas, ke ni ne povos pluiri hodiaŭ vespere.

— Kio estas al mia mastro? — demandis Sam per mallaŭta voĉo, rigardante petege Paŝegulon. — Lia vundo estas eta, kaj ĝi jam fermiĝis. Nenio videblas krom frosta blanka cikatro sur lia ŝultro.

— Frodo estas tuŝita de l' armiloj de la Malamiko, — diris Paŝegulo, — kaj efikas iu veneno aŭ misaĵo, kiun mia lerto ne kapablas elpeli. Sed ne rezignu la esperon, Sam!

La nokto estis malvarma sur la alta verto. Ili bruligis malgrandan fajron sub la torditaj radikoj de malnova pino, kiu pendis super malprofunda kavaĵo: ŝajnis, ke tie oni iam elminis ŝtonojn. Ili sidis kunpremite. La vento

trablovis froste la pasejon, kaj ili aŭdis ĝemi kaj susuri sube la arbokapojn. Frodo kuŝis duonsonĝe, imagante ke senfinaj malhelaj flugiloj preterglisas super li, kaj ke per la flugiloj rajdas persekutantoj, kiuj serĉas lin en ĉiuj kavaĵoj de la montetoj.

La mateno aŭroris hela kaj bela; la aero estis pura, kaj la lumo pala kaj klara en pluvlavita ĉielo. Iliaj koroj estis kuraĝigitaj, sed ili sopiris, ke la suno varmigu iliajn malvarmajn rigidajn membrojn. Tuj kiam lumiĝis, Paŝegulo kunprenis Gajan kaj iris ekzameni la altaĵon oriente de l' pasejo. La suno jam leviĝis kaj brilis hele, kiam li revenis kun novaĵo pli konsola. Ili nun iras pli aŭ malpli ĝustadirekten. Se ili pluirus malsupren laŭ la alia flanko de la firsto, la Montoj estus maldekstre de ili. Paŝegulo denove ekvidis iom antaŭe Bruakvon, kaj li sciis, ke, kvankam ĝi estis kaŝita al la vido, la Vojo al la Transpasejo situas ne malproksime de la rivero kaj kuŝas sur la bordo pli proksima al ili.

— Ni devas celi denove la Vojon, — li diris. — Ni ne povas esperi trovi irejon tra ĉi tiuj montetoj. Kiom ajn da danĝero ĝi prezentas, la Vojo estas nia sola aliro al la Transpasejo.

Manĝinte, ili tuj ekmarŝis denove. Ili subengrimpis malrapide laŭ la suda flanko de l' verto, sed la vojo estis pli facila ol ili antaŭvidis, ĉar la deklivo estis ĉi-flanke multe malpli apika, kaj post nelonge Frodo povis ekrajdi denove. La kompatinda maljuna poneo de Vilĉjo Filikĉjo evoluigis neatenditan talenton pri trovado de padoj kaj pri ŝparado de laŭeble multaj skuoj al la rajdanto. Iliaj animoj revigliĝis. Eĉ Frodo sentis sin pli bonfarta en la matena lumo, sed de tempo al tempo nebulo ŝajnis blindigi lin, kaj li viŝis per sia mano la okulojn.

Grinĉjo iom antaŭis la aliajn. Subite li turniĝis kaj alvokis ilin.

— Ĉi tie estas pado! — li kriis.

Kiam ili atingis lin, ili vidis, ke li ne eraris: klare vidiĝis la komenco de pado, kiu supreniris kun multaj serpentumoj el la subaj arboj kaj malaperis sur la montosupro malantaŭe. En kelkaj lokoj ĝi estis jam malklara kaj superkreskita, aŭ ŝtopita de falintaj ŝtonoj kaj arboj; sed ĝi ŝajnis iam multe uzita. Ĝi estis pado kreita per fortaj brakoj kaj pezaj piedoj. Ie-tie arboj estis faligitaj aŭ falintaj, kaj grandaj rokoj estis fenditaj aŭ flankenmovitaj por lasi trairon.

Ili laŭiris la padon dum kelka tempo, ĉar ĝi proponis la plej facilan vojon suben, sed ili iris singarde, kaj ilia zorgemo pliiĝis, kiam ili alvenis la malhelajn arbojn, kaj la pado iĝis pli klare videbla kaj pli larĝa. Subite elirinte el zono da pinoj ĝi subeniris apike laŭ deklivo, kaj turniĝis abrupte maldekstren ĉirkaŭ rokecan ŝultron de la monteto. Kiam ili alvenis la angulon, ili ĉirkaŭrigardis ĝin kaj vidis, ke la pado antaŭeniris sur ebena

striaĵo sub la frunto de malalta klifo superpendita de arboj.

En la ŝtona muro estis malfermita pordo, pendanta malrekte de la sola granda ĉarniro.

Antaŭ la pordo ili haltis. Trae estis kaverno aŭ roka ĉambro, sed pro la interna malhelo nenio estas videbla. Paŝegulo, Sam kaj Gaja, puŝante per sia tuta forto, sukcesis malfermi iom pli larĝe la pordon, kaj poste eniris Paŝegulo kaj Gaja. Ili ne eniris tre longen, ĉar sur la planko kuŝis multaj malnovaj ostoj, kaj nenio alia videblis proksime al la enirejo krom iuj grandaj malplenaj vazoj kaj rompitaj potoj.

— Sendube tio ĉi estas trol-truo, se entute ekzistas tiaj! — diris Grinĉjo. — Elvenu, vi du, kaj ni foriru. Jam ni scias, kiu kreis la padon — kaj prefere ni rapide forlasu ĝin.

— Ne necesas, ŝajnas al mi, — diris Paŝegulo, elvenante. — Ĝi certe estas trol-truo, sed ŝajnas, ke ĝi estas jam delonge forlasita. Laŭ mia opinio ne necesas timi. Sed ni descendu singarde, kaj ni vidos.

La pado denove iris antaŭen for de la pordo kaj, turniĝinte dekstren trans la ebenejon, denove plonĝis suben laŭ dense arbokovrita deklivo. Grinĉjo, ne volante vidigi al Paŝegulo, ke li ankoraŭ timas, antaŭiris kun Gaja. Sam kaj Paŝegulo venis malantaŭe, po unu ambaŭflanke de l' poneo de Frodo, ĉar la pado estis nun sufiĉe larĝa por ke kvar aŭ kvin hobitoj marŝu unu apud aliaj. Sed ili ne progresis tre longe antaŭ ol Grinĉjo revenis kurante, sekvate de Gaja. Ambaŭ aspektis teruritaj.

— Ja estas troloj! — Grinĉjo anhelis. — Sube en maldensejo inter la arboj, ne malproksime sube. Ni ekvidis ilin preter la arbotrunkoj. Ili estas grandegaj!

— Ni venos rigardi ilin, — diris Paŝegulo, enmanigante bastonon. Frodo diris nenion, sed Sam aspektis timigita.

La suno estis jam alta, ĝi brilis tra la duone senfoliigitan branĉaron de l' arboj kaj lumigis la maldensejon per helaj makuloj da lumo. Ili haltis subite ĉe la rando, kaj gvatis preter la arbotrunkojn, retenante sian spiron. Tie staris la troloj: tri grandaj troloj. Unu estis kliniĝinta, kaj la aliaj du staris rigardante lin fikse.

Paŝegulo senĝene paŝis antaŭen.

— Rektiĝu, olda ŝtono! — li diris, kaj rompis sian bastonon per bato al la kliniĝinta trolo.

Nenio okazis. La hobitoj eligis spiregon da mirego, kaj poste ridis eĉ Frodo.

— Nu! — li diris. — Ni jam forgesas nian familian historion! Ĉi tiuj certe estas la trio, kiun trafis Gandalfo kverelantan pri la ĝusta metodo kuiri dek tri gnomojn kaj unu hobiton.

— Mi tute ne sciis, ke ni proksimas al tiu loko! — diris Grinĉjo. Li bone konis la rakonton. Bilbo kaj Frodo jam ofte rakontis ĝin; sed efektive li neniam pli ol duone kredis ĝin. Eĉ nun li rigardis la trolojn suspekteme, scivolante, ĉu ia magio eble subite revivigos ilin.

— Vi forgesas ne nur vian familian historion, sed ankaŭ ĉion, kion vi iam sciis pri troloj, — diris Paŝegulo. — Estas plena taglumo kun brila suno, kaj tamen vi revenis provante timigi min per rakonto pri vivantaj troloj nin atendantaj en tiu ĉi maldensejo! Ĉiuokaze vi devis rimarki, ke unu el ili havas malnovan birdneston malantaŭ sia orelo. Tio estus vere nekutima ornamaĵo sur vivanta trolo!

Ili ĉiuj ridis. Frodo sentis revigliĝi sian animstaton: la memorigo pri l' unua sukcesa aventuro de Bilbo estis kuraĝiga. Ankaŭ la suno estis varma kaj konsola, kaj la nebulo antaŭ liaj okuloj ŝajnis iomete malpliiĝi. Ili ripozis kelkan tempon en la maldensejo, kaj manĝis sian tagmanĝon rekte en la ombro de l' grandaj kruroj de la troloj.

— Ĉu iu aŭdigu al ni iom da kantado, dum la suno altas? — diris Gaja, kiam ili finmanĝis. — Jam de kelkaj tagoj ni ne aŭdis kanton aŭ rakonton.

— Ne depost Veterverto, — diris Frodo. La aliaj rigardis lin. — Ne ĝenu vin pri mi! — li aldonis. — Mi sentas min multe pli bonfarta, sed al mi ŝajnas, ke mi ne povus kanti. Eble Sam povus elfosi ion el sia memoro.

— Antaŭen, Sam! — diris Gaja. — En via kapo estas pli da stokaĵo, ol vi konigas.

— Pri tio mi ne scias, — diris Sam. — Sed ĉu eble taŭgas tio ĉi? Ĝi ne estas tio, kion mi nomas akceptinda poezio, se vi min komprenas: nur iom da sensencaĵo. Sed tiuj malnovaj statuoj revenigis ĝin en mian kapon.

Stariĝinte kun la manoj malantaŭ la dorso, kvazaŭ li estus lernejano, li komencis kanti laŭ malnova melodio.

Trol' sidis sola sur seĝ' malmola,
je olda osto estis vora;
li jam multjare ĝin mordis knare
ĉar viando ne troveblis.
Koveblis! Moveblis!
En monta kavern' li loĝis sola,
kaj viando ne troveblis.

Jen malebrie Tom venis krie.
Li diris: "Kio vidiĝas tie?
Ĉu ost' tibia de onklo mia,
supoze en la tombejo?
Aplombejo! Pompejo!

Li jam delonge iris pie,
supoze al la tombejo”.

Trol’ diris, “Knabo, ĝi estis rabo,
sed kiom valoras ost’ sub trabo?
La onklo mortis kaj fin-de-sortis
antaŭ ol perdi tibion.
Amfibion! Alibion!
Pri l’ utiligo ne indas strabo:
li ne bezonas tibion”.

Tom diris: “Aĉe, ke vi laŭplaĉe
kaj senpermese traktas maĉe
pri osto krura de l’ onklo nura;
redonu do tiun oston!
La Voston! La Koston!
Al li ĝi mankas tre domaĝe —
redonu do tiun oston!”

“Se vi ne zorgas”, — la trol’ fivortas, —
“mi vin kaj viajn surojn mordos.
Freŝa viando estos frando!
Mi vin gustumos dente.
Silente! Prudente!
Malnovaj ostoj tedas, tordas;
mi vin jam provos dente”.

Sed kiam ŝajnis, ke manĝon ĝi gajnis,
en kroĉa man’ nenioajnis.
Kvazaŭriposte, Tom deposte
lin piedbatis averte.
Tre certe! Konverte!
Laŭ Tom, postaĵa bot’ verŝajne
efikus al li averte.

Sed tre malmola estas la trola
karno sur mont’ sidinta sola,
kaj samas diko de l’ montradiko:
la trola pug’ ne doloris.
Valoris! Koloris!
Kaj Tom ĉagrenis senkonsola,
ĉar lia pied’ doloris.

Tom hejme jamas, la kruro flamas
kaj lia piedo daŭre lamas;
sed trol' nur ridas, kaj tie sidas
kun sia ost' ŝtelita.
Celita! Pelita!
La trola pug' ankoraŭ samas,
kaj ankaŭ la ost' ŝtelita!

— Nu, jen averto al ni ĉiuj! — ridis Gaja. — Bone, ke vi uzis bastonon, sed ne vian manon, Paŝegulo!

— Kie vi akiris tion, Sam? — demandis Grinĉjo. — Mi neniam antaŭe aŭdis tiujn vortojn.

Sam murmuris ion neaŭdeblan.

— Ĝin naskis lia propra kapo, kompreneble, — diris Frodo. — Mi ekscias multon pri Sam Vato dum tiu ĉi vojaĝo. Unue li estis konspiranto, nun li estas spritulo. En la fino li estos sorĉisto aŭ militisto!

— Mi esperas, ke ne, — diris Sam. — Nek unu nek l' alia mi deziras esti!

Posttagmeze ili pluiris tra la arboj. Ili probable laŭiris la saman padon, kiun uzis Gandalfo, Bilbo kaj la gnomoj antaŭ multaj jaroj. Post kelkaj mejloj ili alvenis sur la supron de alta teramaso super la Vojo. Tiuloke la Vojo estis turniĝinta for de l' rivero en ĝia mallarĝa valeto, kaj nun apudis la subaĵojn de l' montetoj, ruliĝante kaj serpentumante norden inter arboj kaj erikokovritaj deklivoj al la Transpasejo kaj la Montoj. Ne malproksime de l' bordo Paŝegulo fingromontris al ŝtono en la herbo. Sur ĝi krude tranĉite kaj jam multe veterdifektite ankoraŭ vidiĝis gnom-runoj kaj sekretaj indikoj.

— Jen! — diris Gaja. — Tio certe estas la ŝtono, kiu indikis la lokon, kie estis kaŝita la oro de l' troloj. Kiom restas el la porcio de Bilbo, mi scivolas, Frodo?

Frodo rigardis la ŝtonon, kaj pensis, ke estus bone, se Bilbo hejmenportus neniun trezoron tiel danĝeroplenan kaj malfacile fordoneblan.

— Tute neniom, — li diris. — Bilbo disdonis la tuton. Li diris al mi, ke li ne sentas, ke ĝi estas lia, ĉar ĝi venis de rabistoj.

La Vojo kuŝis kviete sub la longaj ombroj de fruvespero. Vidiĝis neniu signo pri aliaj vojaĝantoj. Ĉar ne plu restis alternativo, ili subengrimpis laŭ la teramaso kaj, turniĝinte maldekstren, ekiris laŭeble rapide. Baldaŭ supro de monteto forkaŝis la lumon de la rapide okcidentiĝanta suno. Malvarma vento fluis renkonte al ili el la montoj antaŭe.

Ili komencis serĉi lokon apud la Vojo, kie ili povus halti por la nokto, kiam ili aŭdis sonon, kiu rekreis subitan timiĝon denove en iliaj koroj:

hufobruo malantaŭ ili. Ili rerigardis, sed ili ne povis vidi tre foren pro la multaj serpentumoj kaj ondiĝoj de la Vojo. Laŭeble rapide ili kroĉiĝeme forlasis la tretitan vojon supren en la densan erikon kaj mirtelan vepraĵon sur la supraj deklivoj, ĝis ili alvenis etan grapon da dense kreskintaj avelujoj. Elrigardante el la arbustoj, ili povis vidi la Vojon, malklaran kaj grizan en la fadanta lumo, ĉirkaŭ tridek futojn sube de ili. La hufsonoj pliproksimiĝis. Ili progresis rapide, per malpeza *klipeklipeklop*. Tiam mallaŭtege, kvazaŭ forblovate de ili far la venteto, ili ŝajnis ekaŭdi mallaŭtan tintadon, kvazaŭ de sonoriletoj.

— Tio ne sonas kiel ĉevalo de Nigra Rajdanto! — diris Frodo, aŭskultante atente. La aliaj hobitoj konsentis espereme, ke tia ĝi ne estas, sed ĉiuj restis daŭre suspektemaj. Ili tiom longe timis persekuton, ke iu ajn sono de malantaŭe ŝajnis minaca kaj neamika. Sed Paŝegulo nun kliniĝis antaŭen, kurbiĝinte ĝis la tero, kun mano apudorele, kaj ĝojmieno vizaĝe.

La lumo forfadis, kaj folioj sur la arbustaro susuris softe. Pli kaj pli klare jam la sonoriletoj tintis, kaj *klipeti-klip* venis la rapide trotantaj piedoj, Subite vidiĝis sube blanka ĉevalo, glimante en la ombroj, rapide kurante. En la krepusko ĝiaj mordaĵo kaj brido ekbrilis kaj flagris, kvazaŭ ĝi estus inkrustita de gemoj similaj al vivaj steloj. La mantelo de l' rajdanto elflirtis malantaŭ li, kaj lia kapuĉo estis malantaŭen puŝita; liaj oraj haroj fluis muare pro la vento de lia rapido. Al Frodo ŝajnis, ke blanka lumo trabrilas la formon kaj vestaĵon de l' rajdanto, kvazaŭ tra maldensa vualo.

Paŝegulo saltis el sia kaŝloko kaj kuregis suben al la Vojo, altpaŝante tra la eriko; sed eĉ antaŭ ol li moviĝis aŭ vokis, la rajdanto per tiro de l' gvidrimeno haltigis sian ĉevalon, rigardante supren al la densejo, en kiu ili staris. Vidinte Paŝegulon, li elseliĝis kaj kuris al li renkonte, kriante: "Ai na vedui Dúnadan! Mae govannen!"

Liaj parolo kaj klara sonoranta voĉo tute forigis dubon el iliaj koroj: la rajdanto estis elfo. Neniuj aliaj loĝantoj en la vasta mondo havis voĉojn tiel bele aŭdindajn. Sed en lia voko ŝajnis esti tono de hastemo aŭ timo, kaj ili vidis, ke li nun parolas rapide kaj urĝe al Paŝegulo.

Baldaŭ Paŝegulo fingre alvokis ilin, kaj la hobitoj lasis la arbustojn kaj rapidis suben ĝis la Vojo.

— Li estas Glorfindelo, kiu loĝas en la domo de Elrondo, — diris Paŝegulo.

— Saluton, kaj bone renkontite finfine! — diris la nobela elfo al Frodo. — Mi estas sendita el Rivendelo por vin serĉi. Ni timis, ke vi troviĝas en danĝero survoje.

— Do Gandalfo alvenis Rivendelon? — kriis Frodo ĝojplene.

— Ne. Ankoraŭ ne, kiam mi foriris; sed tio estis antaŭ naŭ tagoj,

— respondis Glorfindelo. — Elrondo ricevis novaĵon, kiu zorgigis lin. Iuj el miaj parencoj, vojaĝante en via lando post Baranduino, eksciis, ke io misas, kaj sendis informon kiel eble plej rapide. Tiuj diris, ke la Naŭo eliris, kaj ke vi forvagis portante gravan ŝarĝon senkonsile, ĉar Gandalfo ankoraŭ ne revenis. Eĉ en Rivendelo tre malmultaj kapablas rajdi malkaŝe kontraŭ la Naŭo; sed tiujn, kiuj kapablas, Elrondo sendis norden, okcidenten kaj suden. Oni pensis, ke vi eble devius malproksimen por eviti persekuton, kaj perdiĝus en la sovaĝejo. Estis mia tasko laŭiri la Vojon, kaj mi atingis la Ponton de Miteitelo, kaj lasis tie signon, antaŭ preskaŭ sep tagoj. Tri el la servistoj de Saŭrono estis sur la Ponto, sed ili retiriĝis kaj mi persekutis ilin okcidenten. Mi trovis ankaŭ du aliajn, sed ili forturniĝis suden. Depost tiam, mi serĉis vian spuron. Antaŭ du tagoj mi trovis ĝin, kaj sekvis ĝin trans la Ponton; kaj hodiaŭ mi notis la lokon, kie vi denove subiĝis de la montetoj. Sed ek! Mankas tempo por pliaj informoj. Tial ke vi estas ĉi tie, ni devas riski la danĝeron de l' Vojo kaj ekiri. Troviĝas kvin malantaŭ ni, kaj kiam ili trovos vian spuron sur la Vojo, ili postrajdos nin ventorapide. Kaj ili ne estas solaj. Kie povas esti la ceteraj kvar, mi ne scias. Mi timas, ke ni eble trovos, ke la Transpasejo estas jam gardata kontraŭ ni.

Dum Glorfindelo parolis la vesperaj ombroj plinigriĝis. Frodo sentis, ke lin inundas granda laceco. Ekde kiam la suno komencis subiri, la nebulo antaŭ liaj okuloj plidensiĝis, kaj li sentis, ke ombro intervenas inter li kaj la vizaĝoj de liaj amikoj. Nun doloro lin atakis, kaj li spertis malvarmon. Li ŝanceliĝis, kroĉante sin al la brako de Sam.

— Mia mastro estas malsana kaj vundita, — diris Sam kolere. — Li ne povas daŭre rajdadi post la noktiĝo. Li bezonas ripozon.

Glorfindelo kaptis Frodon, kiam li eksinkis al la tero, kaj malsovaĝe brakuminte lin, li rigardis en lian vizaĝon kun serioza perturbiteco.

Paŝegulo mallonge rakontis pri la atako kontraŭ ilia ripozejo sub Veterverto, kaj pri la timinda ponardo. Li elprenis la tenilon, kiun li retenis, kaj transdonis ĝin al la elfo. Glorfindelo ektremis akceptante ĝin, sed li rigardis ĝin esplore.

— Sur tiu ĉi tenilo estas misaĵoj skribitaj, — li diris, — kvankam eble viaj okuloj ne povas vidi ilin. Retenu ĝin, Aragorno, ĝis ni alvenos la domon de Elrondo! Sed estu singarda, kaj tuŝu ĝin kiel eble plej malmulte! Ve! la vundoj de tiu ĉi armilo estas pli gravaj ol mia sperto ebligas kuraci. Mi faros laŭpove, sed tiom pli urĝe mi insistas, ke vi nun antaŭeniru sen ripozo.

Li fingresploris la vundon sur la ŝultro de Frodo, kaj lia mieno serioziĝis, kvazaŭ tio, kion li eksciis, maltrankviligus lin. Sed Frodo sentis malpliiĝi la malvarmon en siaj flanko kaj brako; iomete da varmo rampis de

la ŝultro ĝis la mano, kaj la doloro mildiĝis. La vesperkrepusko ŝajnis pliheliĝi ĉirkaŭ li, kvazaŭ nubo estus fortirita. Li vidis denove la vizaĝojn de l' amikoj pli klare, kaj iom da nova espero kaj forto revenis.

— Vi rajdos mian ĉevalon, — diris Glorfindelo. — Mi mallongigos la piedingojn ĝis la selorandoj, kaj vi devos sidi laŭeble plej senmove. Sed ne necesas timi: mia ĉevalo ne lasos fali rajdanton, pri kiu mi ordonis, ke ĝi portu. Ĝiaj paŝoj estas malpezaj kaj glataj; kaj se danĝero troproksimiĝos, ĝi vin forportos laŭ rapideco, kiun eĉ la nigraj ĉevaloj de l' malamikoj ne povas egali.

— Ne, tion li ne faros! — diris Frodo. — Mi ne rajdos ĝin, se mi estos forportata al Rivendelo aŭ alia loko, lasante miajn amikojn malantaŭe en danĝero.

Glorfindelo ridetis.

— Mi tre dubas, — li diris, — ke viaj amikoj frontus danĝeron, se vi ne kunestus ilin! La persekuto sekvos vin kaj lasos nin en trankvilo, mi pensas. Ĝuste vi, Frodo, kaj tio, kion vi portas, endanĝerigas nin.

Al tio Frodo ne povis respondi, kaj oni persvadis lin, ke li suriĝu la blankan ĉevalon de Glorfindelo. La poneo estis ŝarĝita anstataŭe per granda parto de l' alies ŝarĝoj, tiel ke ili nun marŝis pli senĝene, kaj dum kelka tempo progresis rapide; sed la hobitoj komencis trovi malfacile imiti la rapidajn senlacajn piedojn de la elfo. Antaŭen li kondukis ilin, en la faŭkon de l' mallumo, kaj daŭre antaŭen sub la profunde nubkovrita nokta ĉielo. Nek stelo nek luno estis. Nur kiam griziĝis la aŭroro, li permesis, ke ili haltu. Grinĉjo, Gaja kaj Sam ĝis tiu tempo preskaŭ dormis sur siaj stumblaj kruroj, kaj eĉ Paŝegulo ŝajnis laŭ la malrigidiĝo de siaj ŝultroj tre laca. Frodo sidis sur la ĉevalo en malhela sonĝo.

Ili subenĵetis sin sur la erikon kelkajn paŝojn de la vojrando, kaj tuj endormiĝis. Ŝajnis, ke ili apenaŭ fermis siajn okulojn, kiam Glorfindelo, kiu taskis sin vaĉi, dum ili dormis, revekis ilin. La suno jam alte suprengrimpis en la matenon, kaj foririntaj estis la nuboj kaj nebuloj de la nokto.

— Trinku jenon! — diris al ili Glorfindelo, verŝante por ĉiuj po iomete da likvoro el sia arĝent-ornamita leda flakono. Ĝi estis klara kiel fontakvo kaj malhavis guston, kaj en la buŝo ĝi sentiĝis nek friska nek varma; sed forto kaj viglo ŝajnis enflui ĉiujn iliajn membrojn dum ili trinkis ĝin. Manĝate post tiu ensorbo, la malfreŝa pano kaj sekigitaj fruktoj (kiuj estis ĉio, kio restis nun al ili) ŝajnis satigi ilin pli trafe ol multaj plenaj matenmanĝoj en la Provinco.

Ili ripozis iom malpli ol kvin horojn, kiam ili denove ekiris laŭ la Vojo. Glorfindelo daŭre urĝis ilin, kaj permesis nur du mallongajn haltojn dum la taga marŝado. Tiumaniere ili trairis preskaŭ dudek mejlojn antaŭ la noktiĝo

kaj alvenis lokon, kie la Vojo turniĝis dekstren kaj subeniris krute al la fundo de la valo, celante la riveron. Ĝis tiam ne estis indiko aŭ sono de persekuto videbla aŭ aŭdebla de la hobitoj; sed ofte Glorfindelo haltis kaj aŭskultis momente, se ili postrestis, kaj zorgmieno ombris lian vizaĝon. Unu-du fojojn li alparolis Paŝegulon en la elfa lingvo.

Sed kiom ajn zorgoplenaj estis iliaj gvidantoj, estis klare, ke la hobitoj ne kapablis pluiri tiun nokton. Ili stumblis antaŭen kapturnaj pro laceco, kaj nepovantaj pensi pri io krom siaj kruroj kaj piedoj. La doloro de Frodo estis duobliĝinta, kaj dum la tago ĉirkaŭantaj lin objektoj fadis al ombroj el fantomeca grizo. Li preskaŭ bonvenigis la alvenon de la nokto, ĉar tiam la mondo ŝajnis malpli pala kaj malplena.

La hobitoj estis ankoraŭ lacaj, kiam ili ekiris frue la postan matenon. Multaj mejloj estis ankoraŭ trapasotaj inter ili kaj la Transpasejo, kaj ili lamiris antaŭen laŭpove plej rapide.

— Nia danĝero estos maksimuma ĝuste antaŭ ol ni alvenos la riveron, — diris Glorfindelo, — ĉar mia koro avertas min, ke la persekuto okazas rapide malantaŭ ni, kaj alia danĝero eble jam atendas ĉe la Transpasejo.

La vojo ankoraŭ subiris konstante, kaj nun troviĝis ambaŭflanke multe da herbo ie-tie, sur kiu la hobitoj marŝis, kiam tio eblis, por helpi al siaj lacaj piedoj. En la malfrua posttagmezo ili alvenis lokon, kie la Vojo subite pasis sub la ombro de altaj pinoj, kaj poste plonĝis en profundan ravinon kun apikaj malsekaj muroj el ruĝaj ŝtonoj. Eĥoj trakuris dum ili rapidis antaŭen, kaj ŝajnis aŭdiĝi multaj paŝosonoj sekvantaj iliajn proprajn. Tute abrupte, kvazaŭ tra pordo de lumo, la Vojo elpasis denove el la fino de l' tunelo en la apertejon. Tie, funde de apika deklivo, ili vidis antaŭ si longan ebenan mejlon, kaj preter tiu la Transpasejon de Bruineno. Aliflanke estis apika bruna teramaso, tredita de serpentuma pado; kaj malantaŭ tio altiĝis montegoj, ŝultro super ŝultro, kaj verto preter verto, en la fadiĝantan ĉielon.

Aŭdiĝis plu eĥo kvazaŭ de sekvantaj piedoj en la ravino malantaŭ ili; sibla sono kvazaŭ vento ekestus kaj verŝiĝus tra l' branĉoj de la pinoj. Unu momenton Glorfindelo turnis sin kaj aŭskultis, poste li saltis antaŭen kun laŭta krio:

— Fuĝu! — li kriis. — Fuĝu! La malamikoj!

La blanka ĉevalo saltis antaŭen. La hobitoj kuris suben laŭ la deklivo. Glorfindelo kaj Paŝegulo sekvis kiel postgardantoj. Ili nur duone transiris la ebenaĵon, kiam subite aŭdiĝis bruo de galopantaj ĉevaloj. El la pordo inter la ĵus lasitaj arboj rajdis Nigra Rajdanto. Li bridis sian ĉevalon, pendolante sur sia selo. Alia sekvis lin, poste alia; poste ankoraŭ du.

— Rajdu antaŭen! Rajdu! — kriis Glorfindelo al Frodo.

Tiu ne obeis tuj, ĉar stranga malvolonto kaptis lin. Lantigante la

ĉevalon, li turnis sin kaj rerigardis. La Rajdantoj sidis sur siaj ĉevalegoj kiel minacaj statuoj sur monfeto, malhelaj kaj solidaj, dum ĉiuj arboj kaj tereno ĉirkaŭ ili malaperis kvazaŭ en nebuleton. Subite li sciis en sia koro, ke ili silente ordonas, ke li atendu. Tiam tuj vekiĝis en li timo kaj malamo. Lia mano lasis fali la bridon kaj kaptis la tenilon de lia glavo, kaj kun ruĝa flagro li elingigis ĝin.

— Rajdu plu! Rajdu plu! — kriis Glorfindelo, kaj poste laŭte kaj klare li alvokis la ĉevalon en la elfa lingvo: — *Noro lim, noro lim, Asfaloth*!

Tuj la blanka ĉevalo forsaltis kaj kuris ventrapide laŭ la lasta stadio de la Vojo. Sammomente la nigraj ĉevaloj saltis suben sur la deklivo persekute, kaj de la Rajdantoj aŭdiĝis terura kriego tia, kian Frodo aŭdis kun hororo en la arbaro de Orient-kvarono malproksime for. Ĝi estis respondita, kaj konsterne al Frodo kaj ties amikoj aperis rapidante el inter la arboj kaj rokoj maldekstre kvar aliaj Rajdantoj. Du rajdis al Frodo, du galopis frenezece al la Transpasejo por malebligi lian eskapon. Ŝajnis al li, ke ili kuras ventrapide kaj daŭre pligrandiĝas kaj pliheliĝas dum iliaj vojoj konverĝis kun la lia.

Frodo retrorigardis momente trans la ŝultro. Li ne plu povis vidi siajn amikojn. La Rajdantoj malantaŭe postrestis: eĉ iliaj ĉevalegoj ne povis konkurenci la rapidecon de la blanka elfa ĉevalo de Glorfindelo. Li denove rigardis antaŭen, kaj espero velkis. Ne ŝajnis eble, ke li atingos la Transpasejon antaŭ ol lin frontos la aliaj, kiuj estis embuskintaj. Li povis vidi klare ilin nun: ŝajnis, ke ili jam forĵetis siajn kapuĉojn kaj nigrajn mantelojn kaj estis vestitaj per blanko kaj grizo. Glavoj nudis en iliaj palaj manoj, kaskoj estis sur iliaj kapoj. Iliaj malvarmaj okuloj ekbrilis, kaj ili alvokis lin per mortminacaj vortoj.

Timo tute plenigis la menson de Frodo. Li ne plu pensis pri sia glavo. Li eligis neniun krion. Li fermis siajn okulojn kaj kroĉiĝis al la kolharoj de l' ĉevalo. La vento fajfis en liaj oreloj, kaj la sonoriloj sur la jungilaro tintis sovaĝe kaj akre. Ekblovo de terura frido trapikis lin kvazaŭ lanco, dum per lasta plirapidiĝo, kiel flagro de blanka fajro, la elfa ĉevalo, hastante kvazaŭ per flugiloj, pasis ĝuste antaŭ la vizaĝo de la antaŭa Rajdanto.

Frodo aŭdis plaŭdon de akvo. Ĝi ŝaŭmis ĉirkaŭ liaj piedoj. Li sentis subitan puŝiĝon kaj akceliĝon, dum la ĉevalo eliĝis el la rivero kaj baraktis supren laŭ la apika bordo. Li jam transiris la Transpasejon.

Sed la persekutantoj estis proksimaj malantaŭe. Supre de l' bordo la ĉevalo haltis kaj retroturniĝis henante atakeme. Ĉe rando de l' akvo sube estis Naŭ Rajdantoj, kaj la animo de Frodo ŝrumpis antaŭ la minaco de iliaj suprenturnitaj vizaĝoj. Li sciis pri nenio, kio malhelpus ilin transiri tiel facile kiel li, kaj al li ŝajnis senutila klopodo eskapi per la longa malcerta

pado de la Transpasejo al la limo de Rivendelo, se la Rajdantoj sukcesus transiri. Ĉiuokaze li sentis, ke al li estas urĝe ordonite halti. Denove malamo ekmoviĝis en li, sed li jam ne havis sufiĉan forton por rezisto.

Subite la plej proksima Rajdanto spronis antaŭen sian ĉevalon. Ĝi haltis antaŭ la akvo kaj baŭmis. Per granda fortostreĉo Frodo sidiĝis rekte kaj svingis sian glavon.

— Retroiru! — li kriis. — Reiru al la lando Mordoro, kaj ne plu sekvu min! — Lia voĉo aŭdiĝis maldensa kaj tranĉa en liaj propraj oreloj. La Rajdantoj haltis, sed Frodo ne havis la potencon de Bombadiljo. Liaj malamikoj mokis lin per maldolĉa kaj fridiga ridado.

— Revenu! Revenu! — ili vokis. — Al Mordoro ni kunprenos vin!

— Reiru! — li flustris.

— La Ringon! La Ringon! — ili kriis per mortminacaj voĉoj; kaj tuj ilia ĉefo urĝis sian ĉevalon antaŭen en la akvon, proksime sekvate de du aliaj.

— Je Elbereta kaj Lutiena la Bela, — diris Frodo per lasta klopodo, levante sian glavon, — nek la Ringon nek min vi havos!

Tiam la ĉefo, kiu jam duone transiris la Transpasejon, stariĝis minace sur la piedingoj, kaj levis sian manon. Frodo estis mutigita. Li sentis, ke lia lango gluiĝas al la buŝosupro kaj lia koro forte batadas. Lia glavo rompiĝis kaj falis el lia tremanta mano. La elfa ĉevalo baŭmis kaj snufis. La unua el la nigraj ĉevaloj jam preskaŭ surpaŝis la bordon.

Tiumomente aŭdiĝis bruado kaj flusado: sono de laŭta torento rulanta multajn ŝtonojn. Malklare Frodo vidis, ke la rivero sube leviĝis, kaj laŭ ĝia fluado venis plumkresta ondoĉevalaro. Ŝajnis al Frodo, ke sur la krestoj flagras blankaj flamoj kaj li duone supozis, ke li vidas en la akvo blankajn rajdantojn sur blankaj ĉevaloj kun ŝaŭmantaj kolharoj. La tri Rajdantoj ankoraŭ meze de la Transpasejo estis inunditaj: ili malaperis, subite superonditaj sub kolera ŝaŭmo. La malantaŭaj retrotis konsternite.

Per la lastaj velkantaj sensoj Frodo aŭdis kriojn, kaj al li ŝajnis, ke li vidas, post la Rajdantoj hezitantaj ĉeborde, brilantan figuron el blanka lumo; kaj malantaŭ ĝi kuris multaj ombraj formoj svingantaj flamojn, kiuj flagris ruĝe en la griza nebulo, kiu inundis la mondon.

La nigrajn ĉevalojn plenigis frenezeco, kaj terurite saltante antaŭen ili portis siajn rajdantojn en la rapidan fluson. Ties akraj krioj estis dronigitaj per la bruado de l' rivero dum ĝi forportis ilin. Poste Frodo sentis sin falanta, kaj la bruo kaj konfuzo ŝajnis leviĝi kaj inundi lin kune kun la malamikoj. Li nenion plu aŭdis aŭ vidis.

LA DUA LIBRO


Nebulecaj Montoj
ARNORO
ERIADORO
Fortlindono
Hobiturbo
Bio
Fornosto
Etenerikejoj
Holino
DUNLANDO
ROHJANO
Fangorno
Brunaj Terenoj
Dagorlado
Emin Muilo
Eredo Litui
MORDORO
Orodruino
Fera Montaro
Ereboro
Esgarodo
Rhunaj Montaro
RHUNO
ĤANDO
Dol Amroto
Belfalasa Golfo
Val Harado
r. Rapida
l. Rhuno
l. Nurnano
r. Anduino
r. Brunino
r. Celebrindo
r. Ĉirimondo
r. Isena
Edoraso
GONDORO

1. Golfo de Ljuno
2. Grizaj Havenoj
3. La Provinco
4. Malnova Arbaro
5. Veterverto
6. Rivendelo
7. Pordo de Morio
8. Isengardo
9. Iridaj Kampoj
10. Lorieno
11. Dol Gulduro
12. Minaso Tirit
13. Minaso Morgul
14. Breĉo de Rohano

1

Multaj renkontiĝoj

Frodo vekiĝis kaj konstatis, ke li kuŝas sur lito. Unue li supozis, ke li dormis ĝis malfrue, post longa malagrabla sonĝo, kiu ankoraŭ ŝvebis rande de l' memoro. Aŭ eble li malsanis? Sed la plafono aspektis stranga; ĝi estis plata, kaj ĝi havis malhelajn trabojn riĉe ĉizitajn. Li kuŝadis ankoraŭ kelkan tempon rigardante makulojn da sunlumo sur la muro, kaj aŭskultante la bruon de akvofalo.

— Kie mi troviĝas, kaj kioma horo estas? — li diris voĉe al la plafono.

— En la domo de Elrondo, kaj estas la deka horo matene, — diris iu voĉo. — Estas mateno de la dudek-kvara de oktobro, se vi emas scii.

— Gandalfo! — kriis Frodo, sidiĝante. Jen estis la maljuna sorĉisto, sidanta sur seĝo apud la malfermita fenestro.

— Jes, — li diris, — jen mi. Kaj vi estas bonŝanca, ke vi troviĝas ĉi tie, cetere, post ĉiuj absurdaĵoj, kiujn vi kulpis post forlaso de la hejmo.

Frodo rekuŝiĝis. Li sentis sin tro komforta kaj trankvila por diskuti, kaj li ĉiuokaze ne supozis, ke li venkos en diskuto. Li estis jam plene vekiĝinta, kaj memoro pri lia vojaĝo estis revenanta: la katastrofa "tempoŝpara" vojo tra la Malnova Arbaro; la "akcidento" ĉe *La Pranca Poneo*; kaj lia freneza surmeto de l' Ringo en la valeto sub Veterverto. Dum li pripensis ĉion ĉi, vane klopodante alvenigi sian memoron ĝis la atingo de Rivendelo, estis longa silento, rompita nur de mallaŭtaj suĉoj de la Gandalfa pipo, kiam li blovis blankajn fumringojn tra la fenestro.

— Kie estas Sam? — Frodo demandis finfine. — Kaj ĉu bonfartas ĉiuj aliaj?

— Jes, ĉiuj estas bonfartaj kaj bonstataj, — respondis Gandalfo. — Sam estis ĉi tie, ĝis mi forsendis lin por iom ripozi antaŭ proksimume duonhoro.

— Kio okazis ĉe la Transpasejo? — diris Frodo. — Ĉio iel ŝajnis tre malklara; kaj ankoraŭ ŝajnas.

— Jes, certe estis tiel. Vi komencis forvelki, — respondis Gandalfo. — La vundo fine venkis vin. Post ankoraŭ kelkaj horoj vi estus ekster niaj savrimedoj. Sed vi posedas iom da forto, kara mia hobito! Kiel vi montris en la dolmenejo. Tio estis krizega: eble la plej danĝera momento el ĉiuj. Se nur vi povus elteni ĉe Veterverto.

— Ŝajnas, ke vi jam scias tre multe, — diris Frodo. — Mi ne parolis al

la aliaj pri la dolmenejo. Komence ĝi estis tro terura, kaj poste aliaj aferoj estis pripensindaj. Kiel vi scias pri tio?

— Vi longe parolis dumdorme, Frodo, — diris Gandalfo milde, — kaj ne estis por mi malfacile legi en viaj menso kaj memoro. Ne zorgu! Kvankam mi ĵus diris "absurdaĵoj", mi ne seriozis. Mi taksas vin alte — kaj la aliajn. Alveni tiel malproksimen ne estis sukceso malgranda, kaj tra tiom da danĝeroj, ankoraŭ posedante la Ringon.

— Ni neniel sukcesus sen Paŝegulo, — diris Frodo. — Sed vin ni bezonis. Sen vi, mi ne sciis, kion fari.

— Mi estis malhelpata, — diris Gandalfo, — kaj tio preskaŭ fariĝis nia fiasko. Kaj tamen mi ne certas: eble estis pli bone tiel.

— Mi volas, ke vi rakontu al mi la okazintaĵojn!

— En bona horo! Vi ne rajtas paroli aŭ zorgi hodiaŭ, laŭ ordono de Elrondo.

— Sed parolado malhelpus min pensi kaj scivoli, kio estas egale laciga, — diris Frodo. — Mi jam tute vekiĝis, kaj mi memoras tiom da aferoj klarigendaj. Kial vi estis malhelpata? Vi devus rakonti al mi almenaŭ tion.

— Vi aŭdos baldaŭ ĉion deziratan, — diris Gandalfo. — Ni kunvenigos Konsiliĝon, tuj kiam vi estos sufiĉe forta. Dume mi diras nur, ke mi estis kaptita.

— Vi? — kriis Frodo.

— Jes, mi, Gandalfo la Griza, — diris la sorĉisto seriozege. — En la mondo estas multaj potencoj, por bono kaj por malbono. Iuj estas pli potencaj ol mi. Kontraŭ iuj mi ankoraŭ ne mezuriĝis. Sed alvenas mia horo. La Mastro de Morgulo kaj ties Nigraj Rajdantoj jam elmergiĝis. Milito estas preparata.

— Do vi jam sciis pri la Rajdantoj antaŭ ol mi renkontis ilin?

— Jes, mi sciis pri ili. Efektive mi iam parolis al vi pri ili; ĉar la Nigraj Rajdantoj estas la Ringofantomoj, la Naŭ Servistoj de la Mastro de l' Ringoj. Sed mi ne sciis, ke ili releviĝis, aŭ mi estus tuj fuĝinta kun vi. Mi aŭdis novaĵon pri ili nur post kiam mi forlasis vin en junio; sed tiu historio estas prokrastenda. Aktuale ni estas savitaj el katastrofo, dank' al Aragorno.

— Jes, — diris Frodo, — ĝuste Paŝegulo savis nin. Tamen komence mi timis lin. Sam neniam tute fidis lin, mi opinias, almenaŭ ĝis la renkonto kun Glorfindelo.

Gandalfo ridetis.

— Pri Sam mi aŭdis la tuton, — li diris. — Li jam ne plu kovas dubojn.

— Mi ĝojas, — diris Frodo. — Ĉar mi jam tre ŝatas Paŝegulon. Nu, *ŝatas* ne estas la ĝusta vorto. Mi volas diri, ke li estas kara al mi; kvankam li estas stranga kaj foje severa. Fakte, li memorigas min pri vi. Mi ne sciis, ke

tiaj estas iuj granduloj. Mi supozis, nu, ke ili estas nur grandaj, kaj iom stultaj: bonkoraj kaj stultaj kiel Buterburo, aŭ stultaj kaj malicaj kiel Vilĉjo Filikĉjo. Sed fakte ni en la Provinco ne scias multon pri homoj, krom eble pri la brianoj.

— Eĉ pri ili vi ne scias multon, se vi opinias, ke maljuna Barlimano estas stulta, — diris Gandalfo. — Li estas sufiĉe saĝa sur propra tereno. Li pensas malpli multe ol li parolas, kaj malpli rapide; tamen li kapablas travidi brikan muron, se li disponas sufiĉan tempon (kiel oni diras en Brio). Sed restas malmultaj en Mez-Tero tiaj, kia Aragorno filo de Aratorno. La gento de la Reĝoj el trans la maro preskaŭ finiĝis. Eble ĉi tiu Milito de l' Ringo estos ilia lasta aventuro.

— Ĉu vi vere asertas, ke Paŝegulo estas gentano de l' malnovaj Reĝoj? — diris Frodo mirigite. — Mi supozis, ke ili ĉiuj malaperis antaŭlonge. Mi pensis, ke li estas nur disirulo.

— Nur disirulo! — kriis Gandalfo. — Kara mia Frodo, ĝuste tiaj estas la disiruloj: la lasta restaĵo en la Nordo de la granda popolo, la homoj de Okcidentio. Ili jam pli frue helpis min; kaj mi bezonos ilian helpon dum la tagoj venontaj; ĉar ni alvenis Rivendelon, sed la Ringo ankoraŭ ne ripozas.

— Supozeble ne, — diris Frodo. — Sed ĝis nun mi sole pensis, kiel alveni ĉi tien, kaj mi esperas, ke mi ne devos iri pluen. Estas tre agrable simple ripozi. Mi pasigis monaton da ekzilo kaj aventuro, kaj mi trovas, ke tio plene sufiĉas al mi.

Li silentiĝis kaj fermis siajn okulojn. Post iom da tempo li ekparolis denove.

— Mi kalkuladis, — li diris, — kaj mi ne povas sumigi ĝis la dudek-kvara de oktobro. Devus esti la dudek-unua. Certe ni atingis la Transpasejon je la dudeka.

— Vi parolis kaj kalkulis pli ol bonfartas al vi, — diris Gandalfo. — Kiel sentiĝas nun viaj flanko kaj ŝultro?

— Mi ne scias, — Frodo respondis. — Ili tute ne sentiĝas: kio estas pliboniĝo, sed, — li faris provon, — mi povas denove iom movi mian brakon. Jes, ĝi reviviĝas. Ĝi ne estas malvarma, — li aldonis, tuŝante sian maldekstran manon per la dekstra.

— Bone! — diris Gandalfo. — Ĝi repariĝas rapide. Vi baldaŭ estos refortiĝinta. Elrondo vin kuracis: li prizorgis vin dum tagoj, ekde kiam oni enportis vin.

— Tagoj? — diris Frodo.

— Nu, kvar noktoj kaj tri tagoj, se diri precize. La elfoj portis vin de la Transpasejo nokte de la dudeka, kaj ĝuste tie vi fuŝis la kalkulon. Ni estis treege maltrankvilaj, kaj Sam apenaŭ forlasis vian apudon, tage aŭ nokte,

krom por kurieri. Elrondo estas majstro de l' kuracado, sed la armiloj de nia Malamiko estas mortigaj. Se diri la veron, mi havis malmulte da espero, ĉar mi suspektis, ke ankoraŭ restas en la fermita vundo iu ero de la klingo. Sed ĝis hieraŭ nokte ĝi ne estis trovebla. Tiam Elrondo eligis fragmenton. Ĝi estis profunde eniĝinta, kaj ĝi moviĝis internen.

Frodo ektremis, memorante pri la kruela ponardo kaj noĉa klingo, kiu malaperis en la manoj de Paŝegulo.

— Ne timu! — diris Gandalfo. — Ĝi estas jam for. Ĝi estas fandita. Kaj ŝajnas, ke hobitoj velkas tre malvolonte. Mi konis fortajn batalistojn de la granduloj, kiujn tre rapide venkus tiu ero, kiun vi portis dum dek sep tagoj.

— Kion ili estus farintaj al mi? — demandis Frodo. — Kion la Rajdantoj provis fari?

— Ili provis trapiki vian koron per Morgula ponardo, kiu restas en la vundo. Se ili sukcesus, vi fariĝus tia, kia ili, sed pli malforta kaj komandota de ili. Vi fariĝus fantomo sub rego de la Malhela Mastro; kaj li turmentus vin pro tio, ke vi provis reteni lian Ringon, se eblus turmento pli granda, ol esti rabita de ĝi kaj vidi ĝin sur lia mano.

— Feliĉe, la teruran danĝeron mi ne konstatis! — diris Frodo feble. — Mi estis morttimigita, kompreneble; sed se mi scius pli, mi ne aŭdacus eĉ moviĝi. Estas mirinde, ke mi eskapis!

— Jes, fortuno aŭ la sorto helpis vin, — diris Gandalfo, — se ne paroli pri kuraĝo. Tial ke via koro ne estis tuŝita, kaj nur via ŝultro estis trapikita, ĉar vi rezistis ĝisfine. Sed tio estis tre proksima trafo, por tiel diri. Vin minacis plej grava danĝero dum vi portis la Ringon, ĉar tiam vi estis mem duone en la fantoma mondo, kaj ili eble estus kaptintaj vin. Vi povis vidi ilin, kaj ili povis vidi vin.

— Mi scias, — diris Frodo. — Ili estis terura vidaĵo! Sed kial ni ĉiuj povis vidi iliajn ĉevalojn?

— Ĉar tiuj estas ĉevaloj realaj, same kiel realaj estas la nigraj manteloj, kiujn ili vestas por doni formon al sia nenieco, kiam ili intertraktas kun vivantoj.

— Do kial tiuj nigraj ĉevaloj toleras tiajn rajdantojn? Ĉiuj aliaj bestoj timiĝas pro ilia proksimiĝo, eĉ la elfa ĉevalo de Glorfindelo. La hundoj ululas kaj la anseroj gakas al ili.

— Ĉar tiuj ĉevaloj naskiĝis kaj estas breditaj por servi al la Malhela Mastro en Mordoro. Ne ĉiuj liaj servistoj kaj servutuloj estas fantomoj! Iuj estas orkoj kaj troloj, iuj estas vargoj kaj homlupoj; kaj ekzistis kaj ankoraŭ ekzistas multaj homoj, batalistoj kaj reĝoj, kiuj marŝas vivaj sub la suno, kaj tamen estas sub lia regado. Kaj ties nombro plimultiĝas ĉiutage.

— Kio pri Rivendelo kaj la elfoj? Ĉu Rivendelo estas sekura?

— Jes, provizore, ĝis ĉio alia estos venkita. La elfoj eble timas la Malhelan Mastron kaj eble fuĝos antaŭ li, sed neniam plu ili aŭskultos lin aŭ servos lin. Kaj ĉi tie en Rivendelo loĝas ankoraŭ iuj el liaj ĉefaj malamikoj: la elfaj saĝuloj, princoj de Eldaroj el trans la maroj plej malproksimaj. Tiuj ne timas la Ringofantomojn, ĉar tiuj, kiuj loĝis en la Benita Lando vivas samtempe en ambaŭ mondoj, kaj tiel kontraŭ la vidataĵoj kiel la nevidataĵoj ili posedas grandan potencon.

— Mi pensis, ke mi vidas blankan figuron, kiu brilis kaj ne nebuliĝis kiel la ceteraj. Ĉu do tiu estis Glorfindelo?

— Jes, vi vidis lin momente tia, kia li estas aliflanke: unu el la potenculoj de l' Unue-naskitaj. Li estas elfa princo el familio de regantoj. Efektive en Rivendelo troviĝas potenco kapabla rezisti la potencon de Mordoro, dum iom da tempo; kaj aliloke ankoraŭ loĝas aliaj potencoj. Krome ekzistas potenco alispeca en la Provinco. Sed ĉiuj tiaj lokoj iĝos baldaŭ insuloj sieĝataj, se la aferoj evoluos tiel, kiel nun. La Malhela Mastro elpuŝas sian tutan forton.

» Tamen, — li diris, stariĝinte subite kaj elpuŝinte sian mentonon, dum lia barbo hirtiĝis kaj rektiĝis kvazaŭ minacaj dratoj, — ni devas konservi nian kuraĝon. Vi baldaŭ estos sana, se mi ne mortigos vin per alparoloj. Vi estas en Rivendelo, kaj ne necesas, ke vi zorgu pri io ajn, provizore.

— Mi ne havas kuraĝon, ke mi konservu ĝin, — diris Frodo, — sed aktuale mi ne zorgas. Nur sciigu al mi pri miaj amikoj, kaj rakontu la finon de l' afero ĉe la Transpasejo, kiel mi daŭre petas, kaj mi provizore kontentiĝos. Poste mi ekdormos denove, ŝajnas al mi; sed fermi la okulojn mi ne povos ĝis vi finrakontos al mi tiun historion.

Gandalfo translokigis sian seĝon apud la liton, kaj zorge ekzamenis Frodon. La koloro estis reveninta al ties vizaĝo, kaj liaj okuloj estis klaraj, kaj tute vekiĝintaj kaj konstativaj. Li estis ridetanta, kaj ŝajnis ke malmulte misis ĉe li. Sed al la okuloj de la sorĉisto vidiĝis eta ŝanĝiĝo, kvazaŭ nur aludo pri travidebleco en li, kaj precipe je la maldekstra mano, kiu kuŝis videbla sur la litotuko.

"Tamen tio estas atendebla, — diris al si Gandalfo. — Li ne ankoraŭ trapasis la duonon, kaj ĝis kio li fine alvenos, eĉ Elrondo ne kapablas aŭguri. Ne ĝis miso, mi opinias. Li eble iĝos simila al glaso plenigita de klara lumo por vidkapablaj okuloj".

— Vi aspektas bonege, — li diris voĉe. — Mi riskos mallongan rakonton sen interkonsiliĝo kun Elrondo. Sed tute mallongan, sciu, kaj poste vi devos reendormiĝi. Jen kio okazis, laŭ mia kompreno. La Rajdantoj celis rekte vin, tuj kiam vi fuĝis. Ili ne plu bezonis gvidadon far la ĉevaloj: vi jam iĝis videbla al ili, estante jam sur la sojlo de ilia mondo. Kaj cetere la Ringo

altiris ilin. Viaj amikoj flankensaltis desur la vojo, aŭ ili estus surrajditaj. Ili sciis pri nenio, kio povus vin savi, se la blanka ĉevalo ne sukcesus. La Rajdantoj estis tro rapidaj por ĝisatingo, kaj tro multaj por kontraŭstaro. Senĉevale eĉ Glorfindelo kaj Aragorno kune ne kapablus kontraŭstari ĉiujn Naŭ samtempe. Kiam la Ringofantomoj preterkuris, viaj amikoj postkuris malantaŭe. Proksime al la Transpasejo troviĝas eta kavaĵo apud la vojo, kaŝita per kelkaj stumpaj arboj. Tie ili haste bruligis fajron: ĉar Glorfindelo sciis, ke fluso alvenos, se la Rajdantoj provos transiri, kaj tiam li devos pritrakti iujn, kiuj restos liaborde de l' rivero. Tuj kiam la fluso aperis, li elkuris, sekvate de Aragorno kaj la aliaj, portantaj flamantajn torĉojn. Trafitaj inter fajro kaj akvo, kaj vidantaj elf-princon rivelitan tiel kolerplene, ili senkuraĝiĝis, kaj iliajn ĉevalojn trafis frenezeco. Tri estis forportitaj de la unua flusatako; nun la aliaj estis ĵetitaj en la akvon de siaj ĉevaloj kaj inunditaj.

— Kaj tiel finiĝis la Nigraj Rajdantoj? — demandis Frodo.

— Ne, — diris Gandalfo. — Iliaj ĉevaloj certe pereis, kaj sen tiuj ili estas kripligitaj. Sed la Ringofantomoj mem ne estas tiel facile detrueblaj. Tamen ili ne estas timindaj nuntempe. Viaj amikoj transiris, kiam la fluso forpasis, kaj ili trovis vin kuŝantan survizaĝe ĉe la bordosupro, kun rompita glavo sub vi. La ĉevalo gardostaris apude. Vi estis pala kaj malvarma, kaj ili timis, ke vi estas mortinta, aŭ pli mise. La domanoj de Elrondo renkontis ilin, dum ili malrapide portis vin al Rivendelo.

— Kiu kreis la fluson? — demandis Frodo.

— Elrondo ordonis ĝin, — respondis Gandalfo. — La rivero de ĉi tiu valo estas sub lia regado, kaj ĝi flusas kolere, kiam li ege bezonas bari la Transpasejon. Tuj kiam la estro de l' Ringofantomoj enrajdis la akvon, la fluso estis lanĉita. Se mi rajtas tion diri, mi aldonis kelkajn detalojn proprajn: vi eble ne rimarkis, sed kelkaj el la ondoj prenis formon de grandaj blankaj ĉevaloj kun brilantaj blankaj rajdantoj, kaj estis multaj ruliĝantaj kaj pistantaj rokegoj. Momente mi ektimis, ke ni liberigis tro akran koleron, kaj la fluso elregiĝos kaj forportos vin ĉiujn. En la akvoj, kiuj malsuprenvenas el la neĝo de l' Nebuletaj Montoj estas granda vigleco.

— Jes, nun ĉio revenas al mi, — diris Frodo, — la laŭtega bruo. Mi pensis, ke mi dronas, kune kun miaj amikoj kaj malamikoj. Sed jam ni estas sekuraj!

Gandalfo rapide rigardis al Frodo, sed tiu estis ferminta la okulojn.

— Jes, vi ĉiuj estas sekuraj nuntempe. Baldaŭ okazos festado kaj ĝojado por celebri la venkon ĉe la Transpasejo de Bruineno, kaj vi ĉiuj ĉeestos en honoraj lokoj.

— Bonege! — diris Frodo. — Estas mirinde, ke Elrondo, Glorfindelo

kaj tiaj gravaj princoj, por ne paroli pri Paŝegulo, tiel prizorgas min kaj montras al mi tiom da bonkoreco.

— Nu, multkiale ili devus tion fari, — diris Gandalfo, ridetante. — Mi estas unu taŭga kialo. La Ringo estas alia: vi estas la Ringoportanto. Kaj vi estas la heredinto de Bilbo, la Ringotrovinto.

— Kara Bilbo! — diris Frodo dormeme. — Mi scivolas, kie li estas. Mi volas, ke li estu ĉi tie kaj povu aŭdi la tutan rakonton. Tio ridigus lin. La bovino transsaltis la Lunon! Kaj la kompatinda maljuna trolo!.. — Post tio li profunde endormiĝis.

Frodo nun estis sekura en la Lasta Hejmeca Domo oriente de la Maro. Tiu domo estis, kiel Bilbo antaŭlonge raportis, “domo perfekta, ĉu plaĉas al vi manĝoj aŭ dormo aŭ rakontado aŭ kantado, aŭ nur sidado kaj bonpensado, aŭ agrabla miksaĵo el ĉiuj”. Nura restado tie estis kuracilo kontraŭ laco, timo kaj malĝojo.

Kiam la vespero proksimiĝis, Frodo revekiĝis, kaj li konstatis, ke li ne plu sentas bezonon pri ripozo aŭ dormo, sed emis al manĝado kaj trinkado, kaj probable al postaj kantado kaj rakontado. Li ellitiĝis kaj trovis, ke lia brako jam estas preskaŭ tiel uzebla, kiel ĝi iam estis. Li trovis prete almetitajn purajn vestaĵojn el verda ŝtofo, kiuj bonege konvenis al li. Rigardante spegulon li surpriziĝis vidante multe pli maldikan rebildon de si, ol li memoris: tiu rimarkinde similis la junan nevon de Bilbo, kiu kutimis promenadi kun sia onklo en la Provinco; sed la okuloj alrigardis lin penseme.

— Jes, vi spertis kelkajn aferojn post kiam vi pasintfoje elrigardis el spegulo, — li diris al sia rebildo. — Sed nun al gaja renkontiĝo! — Li etendis siajn brakojn kaj fajfis melodion.

Tiumomente aŭdiĝis frapo ĉe la pordo, kaj envenis Sam. Li kuris al Frodo kaj kaptis ties maldekstran manon, malglate kaj singene. Li milde karesis ĝin, kaj poste li ruĝiĝis kaj rapide forturniĝis.

— Saluton, Sam! — diris Frodo.

— Estas varma! — diris Sam. — Nome, via mano, s-ro Frodo. Ĝi sentiĝis tiom malvarma dum la longaj noktoj. Sed gloro kaj trumpetoj! — li kriis, alturniĝante denove kun brilaj okuloj kaj dancante sur la planko. — Estas bele revidi vin stariĝinta kaj normala, sinjoro! Gandalfo petis, ke mi venu vidi, ĉu vi estas preta malsupreniri, kaj mi supozis, ke li ŝercas.

— Mi estas preta, — diris Frodo. — Ni iru serĉi la ceterajn de la grupo!

— Mi povas konduki vin al ili, sinjoro, — diris Sam. — Granda domo estas ĉi tiu, kaj tre neordinara. Ĉiam ankoraŭ iom por eltrovi, ne sciante, kion vi trovos post angulo. Kaj elfoj, sinjoro! Elfoj tie, kaj elfoj ĉi tie! Iuj reĝsimilaj, teruraj kaj belegaj, sed iuj gajaj kiel infanoj. Kaj la muziko kaj la

kantado — kvankam por aŭskultado mi ne disponis multe da tempo aŭ emo, de kiam ni alvenis. Sed mi komencas scii kelkajn el la lokaj moroj.

— Mi scias, kion vi faris, Sam, — diris Frodo, kroĉante lian brakon. — Sed hodiaŭ nokte vi estos gaja, kaj aŭskultos tiom, kiom deziros via koro. Ek al, gvidu min ĉirkaŭ la angulojn!

Sam kondukis lin tra pluraj koridoroj kaj suben laŭ multaj ŝtupoj kaj eksteren en alta ĝardeno super la kruta riverbordo. Li trovis siajn amikojn sidantaj sub portiko flanke de la domo, frontante orienten. Ombroj estis aperintaj en la suba valo, sed ankoraŭ lumis sur la fruntoj de la montoj en la fora supro. La aero estis varma. La bruo de fluanta kaj kaskadanta akvo sonis laŭte, kaj la vesperon plenigis malforta parfumo de arboj kaj floroj, kvazaŭ la somero daŭre restadus en la ĝardenoj de Elrondo.

— Hura! — kriis Grinĉjo saltleviĝe. — Jen nia nobla parenco! Lasu lokon al Frodo, Mastro de l' Ringo!

— Ĉit! — diris Gandalfo el la ombroj fone de la portiko. — Misaĵoj ne envenas tiun ĉi valon, tamen ni ne devas nomi ilin. La Mastro de l' Ringo estas ne Frodo, sed la mastro de l' Malhela Turo de Mordoro, kies potenco denove etendiĝas sur la mondon! Ni sidas en fortikaĵo. Ekstere mallumiĝas.

— Gandalfo kutimis diri tiajn ĝojigaĵojn, — diris Grinĉjo. — Li opinias, ke mi bezonas ordigon. Sed iel ŝajnas neeble sperti mornon aŭ deprimon en tiu ĉi loko. Mi sentas, ke mi povus kanti, se mi konus ĝustan kanton por la okazo.

— Ankaŭ mi emas kanti, — ridis Frodo. — Kvankam ĉi-momente mi pli emas manĝi kaj trinki!

— Tio baldaŭ estos kuracita, — diris Grinĉjo. — Vi montris vian kutiman ruzon, ellitiĝante ĝustatempe por manĝo.

— Pli ol manĝo! Ja festo! — diris Gaja. — Tuj kiam Gandalfo raportis, ke vi resaniĝis, komenciĝis la preparado. — Apenaŭ li finparolis, ilin vokis en la halon tintado de multaj sonoriloj.

La halo en la domo de Elrondo estis plena de estaĵoj: plejparte elfoj, kvankam ĉeestis kelkaj gastoj alispecaj. Elrondo, laŭ sia kutimo, sidis sur granda seĝo fine de la longa tablo sur podio; kaj apud li unuflanke sidis Glorfindelo, aliflanke Gandalfo.

Frodo rigardis ilin mirigite, ĉar neniam antaŭe li vidis Elrondon, pri kiu rakontis tiom da historioj; kaj sidantaj dekstre kaj maldekstre de li Glorfindelo, kaj eĉ Gandalfo, kiun li supozis koni tiel bone, estis rivelitaj kiel princoj dignaj kaj potencaj.

Gandalfo estis malpli altstatura ol la du aliaj, sed liaj longaj blankaj haroj, lia impona arĝenta barbo, kaj liaj larĝaj ŝultroj, aspektigis lin saĝa reĝo el la pralegendoj. Sur lia maljuna vizaĝo sub abundaj neĝecaj brovoj,

liaj malhelaj okuloj estis metitaj kvazaŭ karboj kapablaj subite ekardi.

Glorfindelo estis altstatura kaj rekta; liaj haroj estis brile oraj, lia vizaĝo bela kaj juna kaj sentima kaj plena je ĝojo; liaj okuloj estis brilaj kaj akravidaj, kaj lia voĉo kiel muziko; sur lia frunto sidis saĝeco, kaj en lia mano estis forto.

La vizaĝo de Elrondo estis senaĝa, nek maljuna nek juna, kvankam sur ĝi estis skribita la memoro pri multaj aferoj, tiel ĝojaj kiel ankaŭ tristaj. Liaj haroj estis malhelaj kiel ombroj de l' krepusko, kaj sur ili estis metita cirklo da arĝento; liaj okuloj estis grizaj kiel klara vespero, kaj en ili estis lumo simila al stelolumo. Respektinda li ŝajnis kiel reĝo kronita de multaj vintroj, kaj tamen bonfarta kiel pruvinta sin batalisto en ties plena forteco. Li estis la Mastro de Rivendelo kaj potenca inter elfoj kaj homoj.

Meze de la tablo, kontraŭ la teksitaj tapetoj sur la muro, estis seĝo sub baldakeno, kaj tie sidis damo belaspekta, kaj tiom ŝi similis laŭ virina maniero Elrondon, ke Frodo konjektis, ke ŝi estas lia proksima parenco. Juna ŝi estis kaj tamen ne tiel; ĉar malgraŭ tio, ke la plektaĵoj de ŝiaj malhelaj haroj estis tuŝitaj de neniu frosto kaj ŝiaj blankaj brakoj kaj klara vizaĝo estis sanaj kaj glataj, kaj la lumo de steloj brilis en ŝiaj helaj okuloj, tamen ŝi aspektis reĝine, kaj pensemo kaj klero vidiĝis en ŝia alrigardo, kiel ĉe iu, kiu spertis multajn aferojn alportitajn de la jaroj. Super ŝia frunto, ŝian kapon kovris ĉapo el arĝenta punto pasamentita de etaj gemoj, brile blankaj; sed ŝia mola griza robo estis ornamita nur per zono el folioj formitaj el arĝento.

Tiel okazis, ke Frodo ekvidis tiun, kiun vidis nur malmultaj mortemuloj: Arvenan, filinon de Elrondo, pri kiu oni diris, ke la aspekto de Lutiena revenis sur la teron; kaj ŝi nomiĝis Undomiela, ĉar ŝi estis la vesperstelo de sia gento. Longe ŝi restis en la lando de l' parencaro de sia patrino, en Lorieno trans la montoj, kaj nur lastatempe revenis al la domo de sia patro. Sed ŝiaj fratoj, Eladano kaj Elrohiro, forestis pro kavalirado; ĉar ili rajdis ofte tre disten kun la disiruloj de l' nordo, forgesante neniam la turmentiĝon de sia patrino en la kavernaĉoj de l' orkoj.

Tiun belecon en vivanto Frodo neniam antaŭe vidis aŭ mense imagis; kaj li estis samtempe surprizita kaj konfuzita konstatinte, ke ricevis seĝon ĉe l' tablo de Elrondo inter tiuj personoj tiel noblaj kaj belaj. Kvankam li havis taŭgan seĝon, kaj estis altigita per pluraj kusenoj, li sentis sin tre malgranda, kaj iom ekstermedia; sed tiu sento baldaŭ forpasis. La festo estis gaja kaj la manĝaĵoj tute tiaj, kiajn povus deziri lia malsato. Pasis iom da tempo antaŭ ol li denove ĉirkaŭrigardis aŭ turniĝis al siaj apudsidantoj.

Li serĉis unue siajn amikojn. Sam estis petinta permeson servi al sia mastro, sed estis informita, ke ĉi-foje li estas honora gasto. Frodo povis nun

lin vidi, sidantan kun Grinĉjo kaj Gaja ĉe la antaŭa fino de unu el la flanktabloj proksime al la podio. Li povis vidi neniun signon de Paŝegulo.

Apud Frodo dekstre sidis gnomo gravaspekta, riĉe vestita. Lia barbo, tre longa kaj duigita, estis blanka preskaŭ tiom kiom la neĝblanka ŝtofo de liaj vestaĵoj. Li portis arĝentan zonon, kaj ĉirkaŭ lia kolo pendis ĉeno el arĝento kaj diamantoj. Frodo ĉesis manĝi por alrigardi lin.

— Bonvenon kaj bone renkontite! — diris la gnomo, turnante sin al li. Poste, imagu, li stariĝis kaj riverencis. — Gloino je via servo, — li diris, kaj riverencis pli profunden.

— Frodo Baginzo je servo de vi kaj via familio, — diris Frodo ĝustaresponde, stariĝante surprizite kaj dispelante siajn kusenojn. — Ĉu mi prave konjektas, ke vi estas *la* Gloino, unu el la dek du kunuloj de l' granda Torino Kverkaŝildo?

— Tute prave, — respondis la gnomo, levante la kusenojn kaj ĝentile helpante al Frodo residiĝi. — Kaj mi ne demandas, ĉar mi estas jam informita, ke vi estas parenco kaj la adoptita heredinto de nia amiko Bilbo la famkonata. Permesu, ke mi gratulu vin pri via resaniĝo.

— Tre koran dankon, — diris Frodo.

— Vi spertis kelkajn tre strangajn aventurojn, mi aŭdis, — diris Gloino. — Mi ege scivolas, kio tiom longe vojaĝigis *kvar* hobitojn. Okazis nenio simila de kiam Bilbo nin akompanis. Sed eble mi prefere ne tro detale enketu, ĉar Elrondo kaj Gandalfo ŝajne ne emas tion ĉi priparoli?

— Mi opinias, ke ni ne priparolu ĝin, alrnenaŭ nuntempe ne, — diris Frodo ĝentile. Li konjektis, ke eĉ en la domo de Elrondo la Ringo ne taŭgis por neformala konversacio; kaj ĉiuokaze li volis forgesi siajn zorgojn dum kelka tempo. — Sed mi estas egale scivola, — li aldonis, — ekscii, kio venigas gnomon tiel gravan tiom malproksimen de la Soleca Monto.

Gloino lin alrigardis.

— Se vi ankoraŭ ne aŭdis tion, mi opinias, ke ankaŭ pri tio ni ankoraŭ ne parolu. Mastro Elrondo kunvokos nin ĉiujn postnelonge, mi opinias, kaj tiam ni ĉiuj aŭdos multajn aferojn. Sed multaj aliaj aferoj estas rakonteblaj.

Dum la cetero de la manĝo ili kunparolis, sed Frodo aŭskultis pli, ol li parolis; ĉar la novaĵoj el la Provinco, escepte de la Ringo, ŝajnis etaj, foraj kaj negravaj, dum Gloino havis multon rakontindan pri okazaĵoj en la nordaj regionoj de Sovaĝujo. Frodo eksciis, ke Grimbeorno la Maljuna, filo de Beorno, estas nun la estro de multaj fortikuloj, kaj al ties lando inter la Montoj kaj Mornarbaro aŭdacas iri nek orko nek lupo.

— Efektive, — diris Gloino, — se ne ekzistus la beornidoj, trapaso de Dalo ĝis Rivendelo estus jam delonge neebliĝinta. Ili estas kuraĝuloj kaj tenas apertaj la Altan Pasejon kaj la vadejon de Karoko. Sed iliaj impostoj

estas altaj, — li aldonis, skuante la kapon; — kaj samkiel la praa Beorno ili ne tro multe ŝatas gnomojn. Tamen, ili estas fidindaj, kaj tio multe valoras en la nuna epoko. Nenie troviĝas homoj tiel amikemaj al ni kiel la homoj en Dalo. Ili estas bonuloj, la bardidoj. Regas ilin la nepo de Bardo la Arkpafisto, Brando — filo de Baino, filo de Bardo. Li estas reĝo forta, kaj lia regno nun etendiĝas malproksime suden kaj orienten de Esgarodo.

— Kaj kio pri viaj propraj gentanoj? — demandis Frodo.

— Multo estas rakontinda, tiel bona kiel malbona, — diris Gloino, — tamen plejparte bona: ni estas ĝis nun bonŝancaj, kvankam ni ne evitas la ombrojn de la nuna epoko. Se vi vere emas sciiĝi pri ni, mi volonte rakontos al vi novaĵojn. Sed silentigu min, kiam vi enuiĝos! La gnomaj langoj ne laciĝas, parolante pri iliaj metiaĵoj, oni diras.

Kaj tiam Gloino lanĉis longan rakonton pri la faraĵoj de la gnomregno. Li ĝojis trovi tiel ĝentilan aŭskultanton; ĉar Frodo aperigis neniun signon de enuiĝo kaj ne provis ŝanĝi la temon, kvankam fakte li baldaŭ iom konfuziĝis inter la nekonitaj nomoj de personoj kaj lokoj, pri kiuj li neniam antaŭe aŭdis. Lin interesis tamen informo, ke Daino estas ankoraŭ Reĝo sub la Monto, kaj estas nun maljuna (ĉar pasis lia ducent-kvindeka jaro), respektata, kaj fabelece riĉa. El la dek kunuloj, kiuj travivis la Batalon de Kvin Armeoj, sep ankoraŭ restis ĉe li: Dvalino, Gloino, Dorio, Norio, Bifuro, Bofuro, kaj Bomburo. Bomburo estis nun tiel grasa, ke li ne kapablis sin movi de la kanapo ĝis la ĉetabla seĝo, kaj bezonataj estis ses junaj gnomoj por levi lin.

— Kaj kio okazis pri Balino kaj Orio kaj Oino? — demandis Frodo. Ombro trapasis la vizaĝon de Gloino.

— Ni ne scias, — li respondis. — Estas grandparte pro Balino, ke mi venis por peti konsilojn de tiuj, kiuj loĝas en Rivendelo. Sed hodiaŭ vespere ni parolu pri aferoj pli gajaj!

Gloino tiam komencis paroli pri la metiaĵoj de siaj gentanoj, sciigante al Frodo pri ilia granda laboro en Dalo kaj sub la Monto.

— Ni faris bone, — li diris. — Sed rilate la metalojn ni ne kapablas konkurenci kun niaj patroj, el kies sekretoj multaj estas perditaj. Ni faras bonan armaĵon kaj akrajn glavojn, sed ni jam ne povas fari maŝarmaĵon aŭ klingojn egalajn al tiuj, kiuj estis farataj antaŭ ol venis la drako. Nur pri minado kaj konstruado ni superas la pratagojn. Vi devus vidi la akvovojojn de Dalo, Frodo, kaj la montojn kaj la lagetojn! Vi devus vidi la ŝtonpavimitajn vojojn multkolorajn! Kaj la halojn kaj kavernecajn stratojn sub la tero kun arkaĵoj ĉizitaj arboforme; kaj la terasojn kaj turojn sur la Montodeklivoj! Tiam vi vidus, ke ni ne maldiligentis.

— Mi venos vidi ilin, se iam mi povos, — diris Frodo. — Kiom

surprizita estintus Bilbo, vidante ĉiujn ŝanĝiĝojn ĉe la Dezertejo de Smaŭgo!

Gloino alrigardis Frodon kaj ridetis.

— Vi tre amis Bilbon, ĉu ne? — li demandis.

— Jes, — respondis Frodo. — Mi prefere vidus lin, ol ĉiujn turojn kaj palacojn en la mondo.

Finfine la festo finiĝis. Elrondo kaj Arvena stariĝis kaj trairis la halon, kaj la ĉeestantoj sekvis ilin laŭ ordo de siaj rangoj. La pordoj estis ĵetmalfermitaj, kaj ili transiris larĝan koridoron kaj tra aliaj pordoj, kaj alvenis alian halon. En ĝi ne estis tabloj, sed hela fajro brulis en granda kameno inter la ĉizitaj pilastroj ambaŭflanke.

Frodo trovis, ke li marŝas kun Gandalfo.

— Tiu ĉi estas la Halo de Fajro, — diris la sorĉisto. — Ĉi tie vi aŭdos multajn kantojn kaj rakontojn, se vi sukcesos maldormi. Sed escepte de ceremoniaj tagoj ĝi kutime staras malplena kaj kvieta, kaj venas ĉi tien personoj, kiuj deziras trankvilon, kaj pensadon. Ĉiam brulas kameno ĉi tie, tra la tuta jaro, sed alia lumo apenaŭ estas.

Kiam Elrondo eniris kaj aliris la seĝon preparitan por li, elfaj muzikistoj ekludis dolĉan muzikon. Malrapide pleniĝis la halo, kaj Frodo plezure rigardis la multajn belajn vizaĝojn, kiuj estis kuniĝintaj; la ora fajrolumo muaris sur ili kaj flagretis sur iliaj haroj. Subite li rimarkis, ne malproksime de l’ fora flanko de la kameno, etan malhelan figuron sidantan sur tabureto kun lia dorso apogita al pilastro. Apud li sur la tero estis trinktaso kaj iom da pano. Frodo scivolis, ĉu li estas malsana (se entute malsano ekzistis en Rivendelo), kaj ne povis ĉeesti la feston. Lia kapo ŝajnis dormklinita al la brusto, kaj faldaĵo de l’ malhela mantelo estis tirita antaŭ lian vizaĝon.

Elrondo antaŭeniris kaj staris apud la silenta figuro.

— Vekiĝu, eta mastro! — li diris, ridetante. Poste, turninte sin al Frodo, fingrovokis lin. — Jen fine venis la horo, kiun vi sopiris, Frodo! Jen amiko kiu longe mankis al vi.

La malhela figuro levis sian kapon kaj malkovris sian vizaĝon.

— Bilbo! — kriis Frodo en subita rekono, kaj li saltis antaŭen.

— Saluton, Frodo, knabo mia! — diris Bilbo. — Do vi finfine alvenis. Mi esperis, ke vi tion sukcesos. Nu, nu! Do tiu ĉi festado okazas honore al vi, mi aŭdis. Espereble ĝi plaĉis al vi?

— Kial vi ne ĉeestis? — kriis Frodo. — Kaj kial ne estis permesate al mi vidi vin pli frue?

— Ĉar vi dormis. Mi vidis *vin* sufiĉe ofte. Mi ĉiutage sidis apud vi kun Sam. Sed rilate la feston, mi ne multe partoprenas tiujn aferojn nuntempe. Kaj io alia estis farenda.

— Kion vi faris?

— Nu, sidis pensante. Nuntempe mi ofte tion faras, kaj tiu ĉi estas plej konvena loko, en kiu oni faru ĝin, kutime. Vekiĝu, ĉu vere! — li diris, turnante okulon al Elrondo. En ĝi estis brila ridemo kaj neniu signo de dormemo videbla al Frodo. — Vekiĝu! Mi ne dormis, Mastro Elrondo. Se vi volas scii, vi ĉiuj forlasis tro frue vian feston, kaj vi interrompis min meze de kantverkado. Mankis al mi unu-du versoj, kaj mi ilin pripensis; sed supozeble mi jam neniam tornos ilin ĝuste. Okazos tiom multe da kantado, ke la ideoj estos tute forpelitaj el mia kapo. Mi devos peti helpon de mia amiko Dunadano. Kie li estas?

Elrondo ridis.

— Li estas trovota, — li diris. — Poste vi du iros en angulon kaj kompletigos vian taskon, kaj ni aŭdos kaj taksos ĝin antaŭ ol fini la amuziĝon. Kurieroj estis senditaj por trovi la amikon de Bilbo, kvankam neniu sciis, kie li estas, aŭ kial li ne ĉeestis la festmanĝon.

Dume Frodo kaj Bilbo sidis flankalflanke, kaj Sam venis rapide kaj lokigis sin en ilia proksimeco. Ili interparolis per softaj voĉoj, ignorante la gajecon kaj la muzikon en la halo ĉirkaŭ ili. Pri si Bilbo raportis malmulton. Kiam li forlasis Hobiturbon, li forvagis sencele, laŭ la Vojo aŭ sur la kamparo ambaŭflanke; sed iel li sin direktis ĉiam al Rivendelo.

— Mi alvenis ĉi tien sen multe da aventuro, — li diris, — kaj ripozinte mi akompanis la gnomojn ĝis Dalo: mia lasta vojaĝo. Mi ne plu vojaĝos. Jam foriris maljuna Balino. Poste mi revenis ĉi tien, kaj ĉi tie mi restis. Mi faris tion kaj alion. Mi verkis iom pli el mia libro. Kaj, kompreneble, mi verkis kelkajn kantojn. Oni kantas ilin de tempo al tempo: nur por plezurigi min, mi opinias; ĉar, kompreneble, ili ne estas vere sufiĉe altnivelaj por Rivendelo. Kaj mi aŭskultas kaj mi pensas. Tempo ĉi tie ŝajnas ne pasi: ĝi simple ekzistas. Entute rimarkinda loko.

» Mi aŭdas ĉiuspecajn novaĵojn, el trans la Montaro, kaj de la sudo, sed preskaŭ nenion el la Provinco. Mi aŭdis pri la Ringo, kompreneble. Gandalfo estis ofte ĉi tie. Li tamen ne sciigis al mi multon, li iĝis pli ol antaŭe silentema dum la lastaj kelkaj jaroj. La Dunadano sciigis al mi pli. Imagu, ke tiu mia ringo kaŭzis tiom da perturbo! Estas domaĝe, ke Gandalfo ne malkovris pli multe jam pli frue. Mi povus alporti tiun aĵon ĉi tien antaŭlonge, sen tiom da klopodo. Mi pensis plurfoje reiri al Hobiturbo por preni ĝin; sed mi maljuniĝas, kaj oni ne permesis al mi tion: Gandalfo kaj Elrondo, tio estas. Ili ŝajnis supozi, ke la Malamiko serĉas min en ĉiuj eblaj lokoj, kaj farus el mi haketaĵon, se li trovus min ŝanceliĝantan en Sovaĝujo. Kaj Gandalfo diris: “La Ringo pasis pluen, Bilbo. Rezultiĝus neniu bono al vi aŭ al aliaj, se vi provus enmiksiĝi denove pri ĝi”. Stranga

speco de komento, ĝuste Gandalfeska. Sed li diris, ke li prizorgas vin, do mi rezignis. Mi treege ĝojas vidi vin sana kaj sekura.

Li paŭzis kaj alrigardis Frodon dubeme.

— Ĉu vi havas ĝin ĉi tie? — li demandis flustre. — Mi ne povas ne esti scivolema, sciu, post ĉio, kion mi aŭdis. Mi tre ŝatus denove rigardi ĝin momentete.

— Jes, mi havas ĝin, — respondis Frodo, spertante strangan malvolonton. — Ĝi aspektas precize tiel same, kiel antaŭe.

— Nu, mi volus ĝin nur ekrigardi momente, — diris Bilbo. Vestante sin, Frodo konstatis, ke dum li dormis la Ringo estis pendigita ĉe lia kolo per nova ĉeno, malpeza sed forta. Malrapide li eltiris ĝin. Bilbo etendis sian manon. Sed Frodo rapide retiris la Ringon. Perturbite kaj mirigite li trovis, ke li plu rigardas ne Bilbon; ombro ŝajnis falinta inter ilin, kaj tra ĝi li konstatis, ke li okulumas etan sulkan kreaĵon kun avida vizaĝo kaj ostaj palpantaj manoj. Li eksentis deziron bati lin.

La muziko kaj kantado ĉirkaŭ ili ŝajnis heziti, kaj okazis silentiĝo. Bilbo rapide alrigardis la vizaĝon de Frodo kaj pasigis manon antaŭ siaj okuloj.

— Nun mi komprenas, — li diris. — Formetu ĝin! Mi bedaŭras: bedaŭras, ke vi ricevis tiun ŝarĝon: bedaŭras pri ĉio. Ĉu aventuroj neniam atingas finon? Supozeble ne. Iu alia ĉiam devas daŭrigi la historion. Nu, nenio farebla. Mi scivolas, ĉu valoras provi finverki mian libron? Sed ni ne ĝenu nin pri tio nun — konigu iom da reala novaĵo! Rakontu al mi pri la Provinco!

Frodo forkaŝis la Ringon, kaj la ombro forpasis, restigante apenaŭ fragmenton da memoro. La lumo kaj muziko de Rivendelo ĉirkaŭis lin denove. Bilbo ridetis kaj gaje ridis. Ĉiu ero da novaĵo el la Provinco, kiun Frodo povis konigi — helpate kaj korektate de tempo al tempo de Sam — ege interesis lin, ekde faligo de plej malgranda arbo ĝis la petolaĵoj de l' plej eta infano en Hobiturbo. Ili tiom profundiĝis en la okazaĵoj de l' kvar Kvaronoj, ke ili ne rimarkis la alvenon de viro vestita per malhelverda ŝtofo. Dum multaj minutoj li staris subenrigardante al ili kun rideto.

Subite Bilbo suprenrigardis.

— He, jen vi finfine, Dunadano! — li kriis.

— Paŝegulo! — diris Frodo. — Vi ŝajnas posedi tre multajn nomojn.

— Nu, *Paŝegulo* estas nomo, kiun mi neniam antaŭe aŭdis, ĉiuokaze, — diris Bilbo. — Pro kio vi nomas lin tiel?

— Oni nomas min tiel en Brio, — diris Paŝegulo, ridante, — kaj tiel oni prezentis min al li.

— Kaj kial vi nomas lin Dunadano? — demandis Frodo.

— La Dunadano, — diris Bilbo. — Tiel li ofte nomiĝas ĉi tie. Sed mi

pensis, ke vi scipovas sufiĉe da elfa lingvo por almenaŭ scii *dún-adan*: Viro el Okcidento, Numenorano. Sed ne konvena horo por lecionoj! — Li turnis sin al Paŝegulo. — Kie vi troviĝis, amiko mia? Kial vi ne ĉeestis la festmanĝon? Damo Arvena estis tie.

Paŝegulo subenrigardis al Bilbo serioze.

— Mi scias, — li diris. — Sed ofte mi devas flankenmeti la ĝojon. Eladano kaj Elrohiro jam revenis neatendite el Sovaĝujo, kaj ili alportis novaĵojn, kiujn mi volis tuj aŭdi.

— Nu, mia karulo, — diris Bilbo, — jam aŭdinte la novaĵojn, ĉu vi ne povas disponigi al mi momenton? Mi volas vian helpon pri io urĝa. Elrondo diris, ke tiu ĉi mia kanto estas kompletigenda antaŭ fino de l' vespero, kaj mankas al mi inspiro. Ni iru en angulon kaj poluru ĝin!

Paŝegulo ridetis.

— Ek do! — li diris. — Aŭdigu ĝin al mi!

Frodo restis senkunula dum iom da tempo, ĉar Sam estis ekdorminta. Li estis sola kaj sentiĝis iom morna, kvankam ĉie ĉirkaŭ li estis kuniĝintaj la rivendelanoj. Sed tiuj proksimaj al li estis silentaj, atentante la muzikon de l' voĉoj kaj la instrumentoj, kaj ili malatentis ĉion alian. Frodo komencis aŭskulti.

Komence la belo de la melodioj kaj la interplektitaj vortoj en la elfa lingvo, kvankam li malmulte komprenis ilin, sorĉadis lin tuj, kiam li ilin ekatentis. Preskaŭ ŝajnis, ke la vortoj alprenis formojn, kaj vizioj pri distaj landoj kaj helaj aferoj, kiujn li neniam antaŭe imagis, disvastiĝis antaŭ li. La fajrolumigita halo iĝis kvazaŭ ora nebuleto super maroj da ŝaŭmo, kiuj suspiris rande de l' mondo. Poste la sorĉo iĝis pli kaj pli sonĝeca, ĝis al li ŝajnis, ke lin transfluas senfina rivero de ŝvelaj oro kaj arĝento, tro sennombraj por kompreno de ĝiaj konturoj; ĝi iĝis parto de la pulsanta aero ĉirkaŭ li, kaj ĝi malsekigis kaj dronigis lin. Rapide li sinkis sub ĝia brila pezo en profundan regnon da dormo.

Tie li longe vagis en sonĝo pri muziko, kiu iĝis fluanta akvo, kaj poste iĝis subite voĉo. Tiu ŝajnis la voĉo de Bilbo ĉantanta versojn. Unue mallaŭte kaj poste pli klare fluis la vortoj.

Maristo estis Erendilo,
en Avernino rendevuis;
kaj per lignar' el Nimbredilo
boaton tie li konstruis;
H velojn teksis el arĝento,
arĝentaj estis ĝiaj lampoj,
la pruo estis cignoforma,
kaj lumis la standardokampoj.

Laŭ armo de l’ antikvaj reĝoj
li vestis sin per maŝaj ringoj;
la ŝildo estis runskribita
por gardi lin de vund-atingoj;
el draka korno la pafarko,
ebonis lia sagpordo;
arĝentis lia maŝkiraso,
glavingo el kalcedonio;
la ŝtala glavo estis brava,
el adamant’ la kaska alto
kun agla plumo kiel kresto,
brilis sur lia brust’ smeraldo.

Li sub la luno kaj sub steloj
preter la nordajn strandojn vagis
laŭ vojoj sorĉkonfuzaj, kie
al mortemuloj ne plu tagis.
De grinco de l’ Glacio Streta,
kie montetojn ombro kovris,
de l’ sovaĝeja arda brulo
li fuĝis haste, kaj manovris
sur la senstela dista akvo,
ĝis Nokton Nulan li alpadis,
kaj pasis, kaj nenie vidis
lumstrandon, kiun li serĉadis.
Lin pelis la koleroventoj,
kaj blinde en la ŝaŭm’ li fuĝis
de okcident’ al oriento
kaj hejmen sen anonc’ rifuĝis.

Elvinga lin alvenis fluge
kaj en mallumo brulis flamo;
pli helis eĉ ol diamanto
la fajr’ de ŝia kapornamo.
La Silmarilon ŝi alligis
kaj kronis lin per lumo viva,
poste kuraĝa, frunte arda,
li pruon turnis; nokte triva
el alimondo trans la Maro
leviĝis ŝtorm’ libera, prema,
potencovent’ el Tarmenelo;

laŭ padoj, kiujn hom’ mortema
malofte iras, la boaton
portadis ĝia spirturmento
sur akuoj longe forgesitaj:
de orient’ al okcidento.

Sur nigraj ondoj bruegantaj
tra l’ Ĉiamnokto la reveno
super la mergiĝintaj strandoj
dronintaj antaŭ Tagdeveno,
ĝis aŭdas li ĉe bordoj perlaj
kie muzikas fin’ de l’ mondo,
kie la oron kaj juvelojn
rulas ĉiame ŝaŭma ondo.
Li vidis la silentan Monton,
kie krepuskas sur genuoj
de Valinor’, kaj Eldamaron
ekvidis for trans marofluoj.
Vagulo nokton eskapinta,
havenon li finfine alas,
ĝis Elfohejmo verda, bela,
aere akra, kie palas
sube de l’ Monto Ilmarino,
en val’ apika ekbrilantaj,
sur Ombrolago respegulaj,
la Tirionaj turoj lampaj.

Li restis tie kavalire
kaj melodiojn ekdisponis,
aŭskultis mire la saĝulojn,
kaj orajn harpojn ili donis.
Lin vestis ili elfablanke
kaj antaŭ li sep lampojn metis
dum li tra l’ Kalaciriano
ĝis fora land’ kaŝita tretis.
Li venis halojn ekster tempo,
kie sennombraj jaroj meĉas,
kie en Ilmarin’ sur Monto
la Plejaĝul’ senfine reĝas;
kaj tiam estis parolite
pri homoj kaj pri elf-rondanoj;

vizioj estis elmontritaj,
malpermesitaj al mondanoj.

Ili el riĉa elfa vitro
por li konstruis karavelon
kun brila pru'; ĝi nek remilojn
havis, nek arĝentmastan velon:
la Silmarilon kiel lumon
kaj vivan flamstandardon ligis
mem Elbereta por brilado;
ŝi al li ankaŭ disponigis
flugilojn de la senmorteco,
kaj ŝarĝis lin per la fortuno
vagi senbordon de l' ĉielo
malantaŭ Sun' kaj luma Luno.

De l' altoj de Ĉiamvespero,
kie defluas softaj fontoj,
lin portis la flugiloj lume
trans la Muregon de la Montoj.
De l' Mondofino li sin turnis
sopire al la hejmo fora
kaj serĉvojaĝis tra la ombroj,
kiel brulanta stel' izola;
li venis super nebuletoj
antaŭ la Suno, flamo dista,
miraĵo antaŭ la aŭroro,
kie Nordlando fluas trista.

Super Mez-Teron li vojaĝis
kaj fine aŭdis la lamenton
de la virinoj kaj elfinoj
en antikvec', la praan tempon.
Sed lia sorto estis peza:
eterne kiel stel' orbiti,
la Cisan Strandon mortemulan
neniam povi plu viziti;
por ĉiam roli la heroldon
kun tasko de la lumprezento,
ŝarĝite per lanterno brila,
la Flamportant' en Okcidento.

La ĉantado ĉesis. Frodo malfermis siajn okulojn kaj vidis, ke Bilbo sidas sur sia tabureto en cirklo da aŭskultintoj, kiuj ridetis kaj aplaŭdis.

— Nun estus bone, ke ni aŭdu ĝin denove, — diris iu elfo. Bilbo stariĝis kaj riverencis.

— Mi estas honorita, Lindiro, — li diris. — Sed estus tro lacige, ripeti ĝin tutan.

— Ne tro lacige al vi, — la elfoj respondis ridante. — Ni scias, ke vin neniam lacigas deklamo de viaj propraj versoj. Sed efektive ni ne kapablas respondi al via demando post unufoja aŭskultado!

— Kio! — kriis Bilbo. — Se vi ne kapablas distingi inter homo kaj hobito, via juĝkapablo estas malpli fajna, ol mi supozis. Ili malsimilas kiel pizoj kaj pomoj.

— Povas esti. Al ŝafoj aliaj ŝafoj sendube aspektas malsimile, — ridis Lindiro. — Aŭ al paŝtistoj. Sed mortemuloj ne estis nia studobjekto. Nin koncernas aliaj aferoj.

— Mi ne diskutos, — diris Bilbo. — Mi estas dormema post tiom da muziko kaj kantado. Mi lasos al vi diveni, se tion vi deziras.

Li stariĝis kaj iris al Frodo.

— Nu, tio estas farita, — li diris per mallaŭta voĉo. — Ĝi disvolviĝis pli bone, ol mi atendis. Ne ofte oni petas duan aŭskulton. Kion vi opinias pri ĝi?

— Mi ne intencas provi konjekti, — diris Frodo ridetante.

— Ne necesas, — diris Bilbo. — Fakte ĝi estas tute mia. Krom ke Aragorno insistis, ke mi enmetu la verdan gemon. Tio ŝajnis al li grava. Mi ne scias kial. Cetere li evidente opiniis, ke la tuta afero estas tro komplika por mia kompreno, kaj li diris, ke se mi aŭdacas verki versojn pri Erendilo en la domo de Elrondo, tio estas mia afero. Supozeble li pravis.

— Mi ne certas, — diris Frodo. — Ĝi ŝajnis al mi iel konvena, kvankam tion mi ne povas klarigi. Mi estis duondorma, kiam vi komencis, kaj ĝi ŝajnis daŭrigi ion, pri kio mi sonĝis. Mi ne komprenis, ke efektive parolas vi preskaŭ ĝis la fino.

— Estas malfacile resti maldorma ĉi tie, ĝis vi kutimiĝas, — diris Bilbo. — Kvankam hobitoj neniam povus akiri tute la elfan avidon pri muziko kaj poezio kaj rakontoj. Ili ŝajne ŝatas tiujn tiom, kiom manĝadon, se ne pli. Ili daŭrigos ankoraŭ longe. Kion vi opinias, ĉu ni forŝteliĝu por iom pli da kvieta konversacio?

— Ĉu eblas? — diris Frodo.

— Kompreneble. Tio ĉi estas plezuro, ne seriozo. Venu-iru laŭplaĉe, kondiĉe ke vi ne kreu bruon.

Ili stariĝis kaj retroiris kviete en la ombrojn, kaj celis la pordon. Ili

postlasis Samon, ankoraŭ profunde dormantan kun rideto sur la vizaĝo. Malgraŭ sia plezuro pri la kunesto kun Bilbo, Frodo spertis eksenton da bedaŭro, kiam ili forpasis el la Halo de Fajro. Ĝuste kiam ili transpaŝis la sojlon, unuopa klara voĉo ekkantis.

A Elbereth Gilthoniel,
silivren penna míriel
o menel aglar elenath!
Na-chaered palan-díriel
o galadhremmin ennorath,
Fanuilos, le linnathon
nef aear, sí nef aearon!

Frodo haltis momente, retrorigardante. Elrondo estis sur sia seĝo kaj la fajrolumo sur lia vizaĝo similis someran lumon sur arboj.

Proksime al li sidis Damo Arvena. Surprizite, Frodo vidis, ke Aragorno staras apud ŝi; lia malhela mantelo estis reĵetita, kaj li ŝajne estis vestita per elf-armaĵo, kaj sur lia brusto brilis stelo. Ili interparolis, kaj poste ŝajnis subite al Frodo, ke Arvena turniĝas al li, kaj la lumo de ŝiaj okuloj trafis lin de malproksime kaj trapikis lian koron.

Li staris senmove, sorĉite, dum la dolĉaj sonoj de l' elfa kanto sonis kvazaŭ klaraj juveloj da vortoj kaj melodio agorditaj.

— Ĝi estas kanto al Elbereta, — diris Bilbo. — Tiun, kaj aliajn kantojn de l' Benita Regno, ili kantos multfoje hodiaŭ vespere. Venu!

Li kondukis Frodon ĝis sia propra ĉambreto. Ĝi frontis la ĝardenojn kaj elrigardis suden trans la ravinon de Bruineno. Tie ili sidis dum kelka tempo, rigardante tra la fenestro al la helaj steloj super la alta arbaro, kaj interparolante mallaŭte. Ili ne plu diskutis pri la bagatelaj novaĵoj el la fora Provinco, nek pri la malhelaj ombroj kaj danĝeroj, kiuj ĉirkaŭis ilin, sed pri la belaj aferoj, kiujn ili kune vidis en la mondo, pri la elfoj, pri la steloj, pri arboj, kaj la milda evoluo de l' hela jaro en la arbaroj.

Fine aŭdiĝis frapo sur la pordo.

— Pardonpete, — diris Sam, enŝovante sian kapon, — sed mi nur scivolas, ĉu vi bezonas ion.

— Kaj pardonpete al vi, Sam Vato, — respondis Bilbo. — Supozeble vi volas diri, ke jam tempo estas, ke via mastro enlitiĝu.

— Nu, sinjoro, okazos morgaŭ Konsiliĝo, mi aŭdis, kaj hodiaŭ li nur la unuan fojon ellitiĝis.

— Tute prave, Sam, — ridis Bilbo. — Vi povas fortroti kaj diri al Gandalfo, ke li enlitiĝis. Bonan nokton, Frodo! Aj amiko, ja estis bele vin revidi! Finfine neniu superas hobitojn, kiam temas pri vere kontentiga konversacio. Mi ege maljuniĝas, kaj mi komencas scivoli, ĉu mi fakte ĝisvivos konatiĝon kun viaj ĉapitroj el nia rakonto. Bonan nokton! Mi promenos, mi opinias, kaj rigardos ĝardene la stelojn de Elbereta. Dormu bone!

2

Konsiliĝo ĉe Elrondo

La postan tagon Frodo vekiĝis frue, sentante sin refreŝigita kaj bonfarta. Li promenis laŭ la terasoj super la brue fluanta Bruineno kaj rigardis la sunleviĝon palan, friskan, super la foraj montoj, kaj la sunlumon transversantan la maldensan arĝentan nebuleton; la roso sur la flavaj folioj ekbrilis, kaj teksitaj filandroretoj okulumis sur ĉiuj arbustoj. Sam marŝis apud li, dirante nenion, sed snufante la aeron, kaj rigardante de tempo al tempo, kun miro en siaj okuloj, al la grandaj altaĵoj en la oriento. La neĝo blankis sur la pintoj.

Sur benko ĉizita en ŝtono apud turniĝo de l' pado ili trovis Gandalfon kaj Bilbon absorbite interparolantajn.

— Saluton! Bonan matenon! — diris Bilbo. — Ĉu preta por la granda Konsiliĝo?

— Mi sentas min preta por ĉio, — respondis Frodo. — Sed antaŭ ĉio mi ŝatus promenadi hodiaŭ kaj esplori la valon. Mi ŝatus atingi tiujn pinarbarojn supre. — Li fingromontris foren laŭ la bordo de Rivendelo norde.

— Vi eble havos okazon poste, — diris Gandalfo. — Sed ni ne povas ankoraŭ plani. Hodiaŭ multo estas aŭdota kaj decidota.

Subite dum ili interparolis aŭdiĝis unuopa klara sonoro.

— Tio estas la averta sonorilo por la Konsiliĝo ĉe Elrondo, — kriis Gandalfo. — Venu jam! Vi kaj Bilbo ambaŭ estas deziratoj.

Frodo kaj Bilbo sekvis la sorĉiston rapide laŭ la serpentuma pado reen al la domo; post ili, seninvite kaj provizore forgesite, trotis Sam.

Gandalfo kondukis ilin ĝis la antaŭpordo, kie Frodo trovis siajn amikojn la antaŭan vesperon. Lumo de l' klara aŭtuna mateno jam ardis en la valo. Bruo de bobelantaj akvoj leviĝis de la ŝaŭma rivero. Kantis birdoj, kaj saneca trankvilo kuŝis sur la regiono. Al Frodo lia danĝerplena fuĝo kaj la onidiroj pri malhelo, kreskanta en la ekstera mondo, jam ŝajnis nur memoroj de perturbita sonĝo; sed la vizaĝoj, Muj turniĝis al ili, kiam ili eniris, estis seriozaj.

Elrondo estis tie, kaj pluraj aliaj sidis silente ĉirkaŭ li. Frodo vidis Glorfindelon kaj Gloinon, kaj en angulo sidis sola Paŝegulo, revestita en siaj malnovaj veturmakulitaj vestaĵoj. Elrondo tiris Frodon al seĝo apud si, kaj

prezentis lin al la ĉeestantoj, dirante:

— Jen, amikoj miaj, hobito Frodo, filo de Drogo. Venis ĉi tien malmultaj tra pli granda danĝero, aŭ pro komisio pli urĝa.

Poste li indikis kaj nomis tiujn, kiujn Frodo ne renkontis pli frue. Ĉe l' flanko de Gloino estis gnomo pli juna: lia filo Gimlio. Apud Glorfindelo ĉeestis pluraj aliaj konsilantoj el la domanaro de Elrondo, inter kiuj Erestoro estis ĉefa; kaj kun li estis Galdoro, elfo el la Grizaj Havenoj, kiu estis alveninta pro komisio de Cirdano la Ŝipfaranto. Troviĝis ankaŭ fremda elfo vestita verde kaj brune, Legolaso, mesaĝisto de sia patro Tranduilo, reĝo de la elfoj de Norda Mornarbaro. Kaj sidanta iom aparte estis alta viro kun bela kaj nobla vizaĝo, malhelhara kaj grizokula, fiera kaj severa laŭ la rigardo.

Li portis mantelon kaj botojn, kvazaŭ por vojaĝo surĉevala; kaj efektive kvankam liaj vestaĵoj estis riĉaj, kaj lian mantelon ornamis fela subŝtofo, ili estis makulitaj pro longa vojaĝado. Li portis kolumon el arĝento, en kiu estis lokita unuopa blanka gemo; liaj bukloj estis tonditaj ĉe la ŝultroj. Sur balteo li portis grandan kornon arĝentmuntitan, kiu nun kuŝis sur liaj genuoj. Li rigardis al Frodo kaj Bilbo en subita ekmiro.

— Jen, — diris Elrondo, turnante sin al Gandalfo, — estas Boromiro, viro de l' sudo. Li alvenis frumatene, kaj serĉas konsilojn. Mi ordonis, ke li ĉeestu, ĉar ĉi tie liaj demandoj ricevos respondojn.

Ne ĉion priparolitan kaj debatitan ĉe la Konsiliĝo necesas nun rakonti. Multon oni diris pri okazaĵoj en la mondo ekstera, precipe en la sudo, kaj en la larĝaj terenoj oriente de l' Montoj. Pri ĉio ĉi Frodo pli frue aŭdis multajn onidirojn, sed la historio de Gloino estis nova por li, kaj kiam la gnomo parolis li aŭskultis atente. Evidentiĝis, ke meze de la admirindeco de siaj manlaboraĵoj, la gnomoj de l' Soleca Monto estis kore zorgoplenaj.

— Jam antaŭ multaj jaroj, — diris Gloino, — ombro de maltrankvilo kovris nian popolon. Ni ne tuj rimarkis ties devenlokon. Vortoj komencis esti sekrete flustrataj: oni diris, ke ni estas enpremitaj en mallarĝan lokon, kaj ke riĉo kaj grandiozeco pli ampleksaj estus troveblaj en mondo pli vasta. Iuj parolis pri Morio: la potencaj laboraĵoj de niaj patroj, kiuj estas nomataj en nia propra lingvo Ĥazad-Dumo; kaj ili deklaris, ke nun finfine ni havas la potencon kaj multnombron por reiri.

Gloino suspiris.

— Morio! Morio! Mirindaĵo de l' norda mondo! Tro profunden ni fosis tie, kaj vekis la timon sennoman. Jam delonge kuŝis malplenaj ties grandegaj konstruaĵoj, post kiam fuĝis la infanoj de Durino. Sed nun ni ekparolis pri ĝi denove kun sopiro, kaj tamen kun timego; ĉar neniu gnomo kuraĝis trapasi la pordojn de Ĥazad-Dumo dum la vivo de multaj reĝoj, escepte nur de Troro, kaj li pereis. Fine tamen Balino aŭskultis la flustrojn,

kaj decidis iri; kaj kvankam Daino ne volonte donis permeson, li kunprenis kun si Orion kaj Oinon kaj multajn niajn gentanojn, kaj ili foriris suden.

» Tio okazis antaŭ preskaŭ tridek jaroj. Dum kelka tempo ni ricevis sciigojn kaj ili ŝajnis bonaj: mesaĝoj raportis, ke Morio estis enirita kaj granda laboro estis komencita tie. Poste estis silento, kaj neniu sciigo alvenis el Morio ekde tiam.

» Poste, antaŭ ĉirkaŭ unu jaro venis kuriero al Daino, sed ne el Morio — el Mordoro: ĉevalisto dumnokta alvokis Dainon al ties pordego. La Reganto Saŭrono la Granda, tiel li diris, deziris nian amikecon. Ringojn li donus por tio, tiajn, kiajn li donis pratempe. Kaj li urĝe demandis pri *hobitoj*, kiaj ili estis, kaj kie ili loĝis. “Ĉar Saŭrono scias, — li diris, — ke unu el tiuj estis iam konata al vi”.

» Je tio ni estis multe ĝenataj, kaj ni donis neniun respondon. Kaj poste lia minaca voĉo malaltiĝis, kaj li estus dolĉiginta ĝin, se tion li kapablus. “Kiel malgrandan signon de via amikeco Saŭrono petas, — li diris, — ke vi trovu tiun ŝteliston, — tia estis lia vorto, — kaj akiru de li, vole-nevole, etan ringon, la plej malgravan el ringoj, Mun iam li ŝtelis. Ĝi estas nur bagatelo, kiun Saŭrono emas havi, kaj garantiaĵo pri via bonintenco. Trovu ĝin, kaj tri ringoj, kiujn la gnomaj regnoj posedis pratempe, estos redonitaj al vi, kaj la regno de Morio apartenos al vi eterne. Trovu nur informojn pri la ŝtelisto, ĉu li ankoraŭ vivas kaj kie, kaj vi ricevos grandan kompensaĵon kaj daŭran amikecon de la Mastro. Se vi rifuzos, la aferoj ne aspektos tiel agrable. Ĉu vi rifuzas?”

» Lia spiro alvenis kvazaŭ siblo de serpentoj, kaj ĉiuj apudstarantoj tremis, sed Daino diris: “Mi diras nek jes nek ne. Mi devas pripensi tiun ĉi mesaĝon kaj kion ĝi signifas sub sia bela mantelo”.

» “Pripensu bone, sed ne tro longe”, — li diris.

» “La tempo de mia pensado estas mia propra elspezaĵo”, — respondis Daino.

» “Provizore”, — li diris kaj forrajdis en la mallumon.

» Pezaj estis la koroj de niaj ĉefoj depost tiu nokto. Ne necesis la minaca voĉo de l’ kuriero por nin averti, ke liaj vortoj entenas kiel minacon tiel ankaŭ perfidemon; ĉar ni jam sciis, ke la potenco, kiu reeniris Mordoron, ne ŝanĝiĝis, kaj ĉiam en la pasinteco ĝi perfidis nin. Dufoje la kuriero revenis, kaj foriris senresponde. La tria kaj lasta reveno, tiel li diras, baldaŭ okazos, antaŭ la jarfino. Kaj do mi estas finfine sendita de Daino por averti Bilbon, ke lin serĉas la Malamiko, kaj por sciiĝi, se eble, kial li deziras tiun ringon, la plej malgravan el ringoj. Cetere ni petegas la konsilon de Elrondo. Ĉar la Ombro kreskas kaj proksimiĝas. Ni ekscias, ke kurieroj venis ankaŭ al reĝo Brando en Dalo, kaj ke li timas. Ni timas, ke li cedos. Jam milito prepariĝas

sur liaj orientaj limoj. Se ni donos neniun respondon, la Malamiko eble movos siajn regatojn por ataki reĝon Brando, kaj ankaŭ Dainon.

— Veninte, vi faris bone, — diris Elrondo. — Vi aŭdos hodiaŭ ĉion necesan por kompreni la celojn de l' Malamiko. Nenion vi povos fari, krom rezisti, kun aŭ sen espero. Sed vi ne staras izolite. Vi ekscios, ke via problemo estas nur parto de la problemo de l' tuta okcidenta mondo. La Ringo! Kion ni faru pri la Ringo, la plej malgrava el ringoj, la bagatelo, kiun Saŭrono emas havi? Tio estas la juĝo, kiun ni devas taksi.

» Tio estas la celo de via alvokiteco ĉi tien. Mi diras "alvokiteco", kvankam mi ne alvokis vin al mi, fremdulojn el foraj landoj. Vi kunvenis kaj renkontiĝis ĉi tie, vere lastmomente, per la hazardo, kiel eble ŝajnas. Tamen ne estas tiel. Kredu prefere, ke tiel estas ordigite, ke ni, kiuj sidas ĉi tie, kaj neniuj aliaj, devas jam trovi konsilon pro la danĝero de la mondo.

» Tial nun estos parolate aperte pri aferoj, kiuj estas kaŝitaj antaŭ ĉiuj krom nur kelkaj ĝis hodiaŭ. Kaj unue, por ke ĉiuj komprenu la danĝeron, la historio de l' Ringo estos rakontata de l' komenco ĝis hodiaŭ mem. Kaj mi komencos tiun historion, kvankam finos ĝin aliaj.

Poste aŭskultis ĉiuj, dum Elrondo per sia klara voĉo parolis pri Saŭrono kaj la Ringoj de Potenco, kaj ilia forĝado dum la Dua Epoko de l' mondo. Parton de lia historio konis iuj ĉeestantoj, sed neniu la kompletan rakonton, kaj multaj okuloj estis turnitaj al Elrondo time kaj mirante, dum li rakontis pri la elfaj forĝistoj de Eregiono kaj ilia amikeco al Morio, kaj ilia avida klériĝemo, per kiu Saŭrono enkaptiligis ilin. Ĉar tiutempe li ankoraŭ ne estis malbonaspekta, kaj ili ricevis lian helpon kaj lertiĝis pri la metioj, dum li ekkonis ĉiujn iliajn sekretojn, kaj perfidis ilin, kaj forĝis sekrete en la Monto de Fajro la Unu Ringon por mastri ilin. Sed Celebrimboro sciis pri li, kaj kaŝis la Tri, kiujn li kreis; sekvis milito, kaj la lando estis dezertigita, kaj la pordego de Morio estis fermita.

Poste tra la sekvintaj jaroj Elrondo spuris la Ringon; sed tial, ke tiu historio estas aliloke priskribita, precize tiel, kiel Elrondo mem ĝin registris en siaj libroj de konoj, ĝi ne estas ĉi tie reskribata. Ĉar ĝi estas historio longa, plena je faroj grandiozaj kaj teruraj, kaj kvankam Elrondo parolis resume, la suno leviĝis sur la ĉielo, kaj la mateno estis forpasanta antaŭ ol li silentiĝis.

Pri Numenoro li parolis, ties gloro kaj ties falo, kaj ia reveno de l' Reĝoj de homoj al Mez-Tero el la Marprofundoj, portate per ŝtormflugiloj. Tiam Elendilo kaj liaj fortegaj filoj, Isilduro kaj Anariono, iĝis grandaj princoj; kaj la Nord-regnon ili faris en Arnoro, kaj la Sud-regnon en Gondoro ĉirkaŭ la elfluejoj de Anduino. Sed Saŭrono de Mordoro atakis ilin, kaj ili kreis la Lastan Aliancon de elfoj kaj homoj, kaj la armeoj de Gil-Galado kaj

Elendilo estis kunvokitaj en Arnoro.

Tiupunkte Elrondo iom paŭzis kaj suspiris.

— Mi bone memoras la belegon de iliaj standardoj. Tio revokis al mi la gloron de l' Praaj Tagoj kaj la armeojn de Beleriando, tiom da gravaj princoj kaj estroj estis kunvokitaj. Kaj tamen ne tiom multaj, nek tiom belaj, kiom ĉe la frakaso de Tangorodrimo, kiam la elfoj supozis, ke miseco estas por ĉiam finita, kaj tiel ne estis.

— Vi memoras? — diris Frodo, elparolante sian penson pro miro. — Sed mi supozis, — li balbutis kiam Elrondo sin turnis al li, — mi supozis, ke la falo de Gil-Galado okazis antaŭ tre longe.

— Tiel ja estis, — respondis Elrondo seriozmiene. — Sed mia memoro reiras eĉ ĝis la Praaj Tagoj. Erendilo estis mia patro, kiu naskiĝis en Gondolino antaŭ ties falo; kaj mia patrino estis Elvinga, filino de Dioro, filo de Lutieno el Doriado. Mi travivis tri epokojn en la Okcidento de la mondo, multajn malvenkojn kaj multajn senrezultajn venkojn.

» Mi estis la heroldo de Gil-Galado kaj marŝis en lia armeo. Mi ĉeestis la Batalon de Dagorlado antaŭ la Nigra Pordo de Mordoro, kie ni venkis: ĉar la Lanco de Gil-Galado kaj la Glavo de Elendilo, Ajgloso kaj Narsilo, estis nekontraŭstareblaj. Mi vidis la lastan interbatiĝon sur la deklivoj de Orodruino, kie mortis Gil-Galado, kaj Elendilo falis, kaj Narsilo rompiĝis sub li; sed Saŭrono mem estis forpelita, kaj Isilduro fortranĉis la Ringon de sur lia mano per la fragmento de l' glavo de lia patro kaj proprigis ĝin al si. Tiam interrompis la fremdulo Boromiro:

— Do jen kio okazis pri la Ringo! — li kriis. — Se iam tia historio estis rakontata en la sudo, ĝi jam delong© forgesiĝis. Mi aŭdis pri la Granda Ringo de tiu, kiun ni ne nomas; sed mi kredis, ke ĝi forpereis el la mondo en la ruino de lia unua regno. Isilduro prenis ĝin! Jen efektive novaĵo.

— Ve, jes, — diris Elrondo. — Isilduro prenis ĝin, kio ne devus okazi. Ĝi devus esti ĵetita tiam en la fajron de Orodruino tute proksime, kie ĝi estis kreita. Sed malmultaj rimarkis tion, kion faris Isilduro. Nur li apogis sian patron en tiu lasta ĝismorta batalo; kaj Gil-Galadon apogis nur Cirdano, kaj mi. Sed Isilduro rifuzis aŭskulti nian konsilon.

» "Tion ĉi mi prenos kiel venĝopagon por mia patro, kaj mia frato", — li diris; kaj tial ĉu ni volis aŭ ne volis, li prenis ĝin por ĝin konservi. Sed baldaŭ li estis de ĝi almorte perfidita; kaj sekve oni nomas ĝin en la nordo Plago de Isilduro. Tamen morto eble preferindis ol tio, kio estus povinta okazi al li.

» Nur al la Nordo venis tiuj novaĵoj, kaj nur al malmultaj. Ne tre mirinde estas, ke vi ne aŭdis pri ili, Boromiro. El la ruino de l' Iridaj Kampoj, kie pereis Isilduro, nur tri viroj revenis trans la montojn post longa

vagado. Unu el ili estis Ohtaro, la eskviro de Isilduro, kiu portis la fragmentojn de la glavo de Elendilo; kaj li alportis ilin al Valandilo, la heredinto de Isilduro, kiu ĉar li estis infano restis ĉi tie en Rivendelo. Sed Narsilo estis rompita kaj ĝia lumo estingita, kaj ĝi ankoraŭ ne estas reforĝita.

» Ĉu mi nomis senrezulta la venkon de la Lasta Alianco? Ne tute tiel, tamen ĝi ne plenumis sian celon. Saŭrono estis venkita, sed ne detruita. Lia Ringo estis perdita sed ne malfarita. La Malhela Turo estis rompita, sed ĝiaj fundamentoj ne estis forigitaj; ĉar ili estis kreitaj per la potenco de la Ringo, kaj dum tiu restas, ili daŭros. Multaj elfoj kaj multaj fortaj viroj, kaj multaj el iliaj amikoj, pereis dum la milito. Anariono estis mortigita, kaj Isilduro estis mortigita; kaj Gil-Galado kaj Elendilo ne plu vivis. Neniam denove ekzistos simila kunligateco de elfoj kaj homoj; ĉar homoj plimultiĝas kaj la Unuenaskitoj malmultiĝas, kaj la du parencaroj estas malintimaj. Kaj ĉiam depost tiu tago la gento de Numenoro velkis, kaj la nombro de iliaj jaroj malpliiĝis.

» En la Nordo post la milito kaj buĉado de l' Iridaj Kampoj, la homoj de Okcidentio estis reduktitaj, kaj ilia urbego Anuminaso apud lago Evendimo ruiniĝis; kaj la posteuloj de Valandilo foriris kaj ekloĝis en Fornosto sur la altaj Nordaj Montetoj, kaj nun ankaŭ tiu estas dezerta. La homoj nomas ĝin Muro de l' Mortintoj, kaj ili timas paŝi tien. Ĉar la gento de Arnoro reduktiĝis, kaj iliaj malamikoj voris ilin, kaj forpasis ilia mastreco, lasante nur verdajn teramasojn sur la herbaj montetoj.

» En la Sudo la regno Gondoro longe daŭris; kaj dum kelka tempo kreskis ĝia grandiozo, memorigante iom pri la potenco de Numenoro, antaŭ ol tiu falis. Altaj turoj konstruitaj de la popolo, kaj fortikaĵoj, kaj havenoj multŝipaj; kaj la flugilhava krono de l' Reĝoj de homoj imponis al gentoj diverslingvaj. Ilia ĉefa urbo estis Osgiliado, Citadelo de l' Steloj, tra kies mezo fluis la Rivero. Kaj Minason Itil ili konstruis, Turon de l' Leviĝanta Luno, oriente sur ŝultro de la Monto de Ombroj. Okcidente sube de la Blankaj Montoj ili konstruis Minason Anor, Turon de l' Subiranta Suno. Tie en la kortoj de la Reĝo kreskis blanka arbo el la semo de tiu arbo, kiun Isilduro alportis trans la profundajn akvojn, kaj la semo de tiu arbo antaŭe venis de la insulo Ereseo, kaj antaŭ tio el la Plejfora Okcidento antaŭ tagoj, kiam la mondo estis juna.

» Sed dum la pasado de la rapidaj jaroj en Mez-Tero rompiĝis la linio de Meneldilo, filo de Anariono, kaj la Arbo velkis, kaj la sango de l' Numenoranoj miksiĝis kun tiu de homoj malpli eminentaj. Foje, dum la gardistoj de la muroj de Mordoro dormis, mallumaĵoj rerampis al Gorgoroto. Kaj okazis, ke elvenis misaĵoj, kaj ili kaptis Minason Itil kaj

ekloĝis en ĝi, kaj ili kreis el ĝi lokon timigan; kaj ĝi estas nomata Minaso Morgul — la Turo de Sorĉado. Ankaŭ Minaso Anor estis alinomita, kiel Minaso Tirit — la Turo Garda; kaj tiuj du urboj ĉiam intermilitis, sed Osgiliado, kiu kuŝis inter ili, dezertiĝis kaj en ĝiaj ruinoj marŝis ombroj.

» Tiel jam estis dum multaj homvivoj. Sed la Mastroj de Minaso Tirit daŭre batalas, kontraŭstarante al niaj malamikoj, konservante la trapason de l' Rivero de Argonado ĝis la maro. Kaj jam tiu parto de la historio, kiun rakontas mi, atingis sian finon, ĉar dum la tagoj de Isilduro la Reganta Ringo forpasis el ĉiu priscio, kaj la Tri estis liberigitaj el ĝia regado. Sed nun ili troviĝas denove en danĝero, ĉar bedaŭrinde la Unu estas trovita. Aliaj parolos pri ĝia trovo, ĉar en tio mi partoprenis malmulte.

Li silentiĝis, sed tuj Boromiro stariĝis, altstatura kaj fiera, antaŭ ili.

— Permesu al mi, Mastro Elrondo, — li diris, — unue diri iom pli pri Gondoro; ĉar efektive el la lando Gondoro mi venis. Kaj estos bone, ke ĉiuj sciu, kio okazas tie. Ĉar malmultaj, mi taksas, scias pri niaj faroj, kaj sekve malmulte konjektas sian endanĝeriĝon, se ni fine malsukcesos.

» Ne kredu, ke en la lando Gondoro la sango de Numenoro estas elĉerpita, nek ke forgesitaj estas iliaj fiero kaj digno. Per nia kuraĝo la sovaĝuloj de la oriento estas ankoraŭ malhelpataj, kaj la teruro de Morgulo forbarata; kaj nur tiel estas paco kaj libero daŭrigataj sur la terenoj malantaŭ ni, remparo de l' okcidento. Sed se la transpasejoj de l' Rivero estos kaptitaj, kio sekvos?

» Tamen tiu horo, eble, jam ne estas malproksima. La Sennoma Malamiko denove leviĝis. Fumo leviĝas denove de Orodruino kiun ni nomas Monto de Sorto. La potenco de la Nigra Lando kreskas tiel, ke ni spertas malfacilaĵojn. Kiam la Malamiko revenis niaj gentanoj estis forpelitaj el Itilio, nia bela tereno oriente de la Rivero, kvankam ni konservis tie ĉeeston kaj armilajn fortojn. Sed ĉi-jare en junio subita milito alvenis el Mordoro, kaj ni estis forviŝitaj. Ni estis malplimulto, ĉar Mordoro alianciĝis kun la orientanoj kaj la kruelaj haradanoj; sed ne la multnombreco venkis nin. Potenco alestis, kiun ni ne spertis pli frue.

» Iuj diris, ke ĝi aspektas kiel granda nigra ĉevalisto, malhela ombro sub la luno. Kie ajn li alvenis, tie furiozo plenigis niajn malamikojn, sed timo ekkaptis niajn plej kuraĝajn, tiel ke ĉevaloj kaj viroj cedis kaj fuĝis. Nur restaĵeto el nia orienta armeo revenis, detruante la lastan ponton, kiu ankoraŭ staris inter la ruinoj de Osgiliado.

» Mi troviĝis en la grupo, kiu defendis la ponton, ĝis ĝi estis faligita malantaŭ ni. Nur kvar saviĝis per naĝado: mia frato, mi kaj du aliaj. Sed daŭre ni batalas, tenante ĉiujn okcidentajn bordojn de Anduino; kaj tiuj, kiuj ŝirmas sin malantaŭ ni, laŭdas nin, se foje ili aŭdas nian nomon; multe

laŭdas, sed malmulte helpas. Jam nur el Rohano rajdas al ni homoj, kiam ni alvokas.

» En tiu ĉi misa horo mi venis pro komisio tra multaj danĝeraj mejloj al Elrondo: cent dek tagojn mi vojaĝis tute sola. Sed mi ne serĉas aliancanojn por milito. La potenco de Elrondo estas en saĝo, ne en armiloj, oni diras. Mi venis por peti konsilojn kaj la malimplikon de duraj vortoj. Ĉar vespere antaŭ la subita atako, sonĝo alvenis mian fraton dum perturbita dormo, kaj poste simila sonĝo ofte revenis al li, kaj unufoje al mi.

» En tiu sonĝo ŝajnis al mi, ke la orienta ĉielo mallumiĝas kaj aŭdiĝas kreska tondrado, sed Okcidente pala lumo postrestis, kaj el ĝi mi aŭdis voĉon, malproksiman sed klaran:

Serĉu la Glavon rompitan:
ĝi loĝas en Imladriso;
tie konsiloj troveblas
pli fortaj ol Morgul-sorĉmiso.
Tie montriĝos signo,
ke proksimiĝas Pereo,
ĉar Plag' Isildura vekiĝos,
duonulo ekstaros el kreo.

El tiuj vortoj ni povis kompreni malmulton, kaj ni interparolis kun nia patro, Denetoro, Mastro de Minaso Tirit, saĝa pri l' konoj de Gondoro. Nur tion ĉi li volis diri, ke Imladriso estis pratempe nomo inter la elfoj de fora norda valo, kie loĝis Elrondo la Duonelfo, la plej majstra el saĝuloj. Tial mia frato pro nia urĝega bezono tre volis atenti la sonĝon kaj serĉi Imladrison; sed pro tio, ke la vojaĝo estos danĝerokaj duboplena, mi mem akceptis la taskon. Malvolonte mia patro donis permeson, kaj longe mi vagadis laŭ vojoj forgesitaj, serĉante la domon de Elrondo, pri kiu multaj aŭdis, sed malmultaj sciis, kie ĝi troviĝas.

— Kaj ĉi tie en la domo de Elrondo estos klarigita al vi pli multo, — diris Aragorno, stariĝante. Li ĵetis sian glavon sur la tablon, kiu staris antaŭ Elrondo, kaj la klingo estis duigita. — Jen la Glavo Rompita! — li diris.

— Kaj kiu estas vi, kaj kiel koncernas vin Minaso Tirit? — demandis Boromiro, mire rigardante la malgrasan vizaĝon de la disirulo kaj ties vetermakulitan mantelon.

— Li estas Aragorno filo de Aratorno, — diris Elrondo; — kaj li estas posteulo per multaj patroj de Isilduro, filo Elendila, el Minaso Itil. Li estas la ĉefo de la Dunadanoj en la Nordo, kaj malmultaj jam restas el tiu popolo.

— Sekve ĝi apartenas al vi, kaj tute ne al mi! — kriis Frodo miregante,

saltstariĝante, kvazaŭ li atendus, ke la Ringon oni tuj postulos.

— Al neniu el ni ĝi apartenas, — diris Aragorno, — sed estas ordonite, ke vi tenu ĝin dum kelka tempo.

— Eligu la Ringon, Frodo! — diris Gandalfo solene. — Jam tempo estas. Tenu ĝin alte, kaj tiam Boromiro komprenos la ceteron de sia enigmo.

Iĝis silente, kaj ĉiuj turnis sian rigardon al Frodo. Lin skuis subitaj honto kaj timo, kaj li spertis grandan malemon vidigi la Ringon, kaj malŝaton je ĝia tuŝo. Li deziris, ke li estu en malproksimo. La Ringo ekbrilis kaj flagris, kiam li tenis ĝin alte antaŭ ili per sia trema mano.

— Vidu la Plagon de Isilduro! — diris Elrondo.

L' okuloj de Boromiro glimis dum li fiksrigardis la oraĵon.

— La Duonulo! — li murmuris. — Ĉu do la pereo de Minaso Tirit finfine alvenas? Sed kial do ni serĉu la Rompitan Glavon?

— La vortoj ne estis *la pereo de Minaso Tirit*, — diris Aragorno. — Sed pereo kaj admirindaj faroj ja alvenas. Ĉar la Glavo Rompita estas la Glavo de Elendilo, kiu rompiĝis sub li, kiam li falis. Ĝin konservis liaj heredintoj, kiam perdiĝis ĉiuj aliaj memoraĵoj; ĉar estis dirite pratempe inter ni, ke ĝi estos refarita kiam la Ringo, Plago de Isilduro, estos trovita. Nun, vidinte la glavon serĉitan, kion vi volas peti? Ĉu vi deziras, ke la Domo de Elendilo revenu al la lando Gondoro?

— Mi ne estis sendita por peti iun komplezon, sed nur por elserĉi la solvon de la enigmo, — respondis Boromiro fiere. — Tamen ni spertas grandajn malfacilaĵojn, kaj la Glavo de Elendilo estus helpilo, kiun ni ne esperis, se io tia efektive povus reveni el la ombroj de l' pasinteco. — Li rigardis denove Aragornon, kaj dubo vidiĝis en liaj okuloj.

Frodo sentis ĉe sia flanko senpaciencan moviĝon de Bilbo. Evidente li estis ĉagrenita subtene al sia amiko. Subite stariĝinte li elpuŝis:

Oro ne ĉiam ekbrilas,
ne ĉiuj vagantoj paneas;
forta maljun' ne senilas,
profunda radik' ne pereas.
El cindroj la fajro denovos,
el ombroj la lumo resaltos;
la glavo rompita renovos,
senkrona la reĝ' reekzaltos.

Ne tre bona, eble, sed aktuala — se vi bezonas pli ol la vorto de Elrondo. Se valoris vojaĝo centdektaga por tion aŭdi, prefere vi aŭskultu ĝin.

Li sidiĝis snufante.

— Mi mem verkis tion, — li flustris al Frodo, — por la Dunadano, antaŭ tre longe, kiam li la unuan fojon rakontis al mi pri si. Mi preskaŭ deziras, ke miaj aventuroj ne finiĝu, kaj ke mi povu akompani lin, kiam venos lia tago.

Aragorno ridetis al li, poste turnis sin denove al Boromiro.

— Miaparte, mi pardonas vian dubemon, — li diris. — Malmulte mi similas la figurojn de Elendilo kaj Isilduro, kiaj ili staras ĉizite en sia majesteco en la haloj de Denetoro. Mi estas nur la posteulo de Isilduro, ne Isilduro mem. Mi havis vivon malfacilan kaj longan; kaj la mejloj kuŝantaj inter ĉi tie kaj Gondoro estas malgranda parto en kalkulo de miaj vojaĝoj. Mi transiris multajn montojn kaj multajn riverojn, kaj paŝis sur multaj ebenaĵoj, eĉ ĝis la foraj landoj Rhuno kaj Harado, kie la steloj aspektas fremde.

» Sed mia hejmo, tiom kiom mi havas ĝin, estas en la nordo. Ĉar tie la heredintoj de Valandilo ĉiam loĝadis en longa nerompita linio de patro al filo tra multaj generacioj. Niaj tagoj mallumiĝis, kaj ni malmultiĝis; sed ĉiam la Glavo pasis al nova konservanto. Kaj tion ĉi mi diros al vi, Boromiro, antaŭ ol fini. Soleculoj estas ni, disiruloj de l' sovaĝejo, ĉasantoj — sed ĉasantaj ĉiam la servistojn de la Malamiko, ĉar ili troviĝas en multaj lokoj, ne nur en Mordoro.

» Se Gondoro, Boromiro, estis brava fortikaĵo, ni ludis alian rolon. Multaj misaĵoj ekzistas, kiujn viaj fortikaj muroj kaj helaj glavoj ne malhelpas. Vi scias malmulte pri la teritorioj ekster viaj limoj. Paco kaj libereco, ĉu vi diras? La nordo estus malmulte spertinta ilin sen ni. Timo detruus ties loĝantojn. Sed kiam mallumaĵoj venas de la sendomaj montetoj, aŭ rampas el sensunaj arbaroj, ili fuĝas antaŭ ni. Kiujn vojojn oni riskus paŝi, kiu sekuro estus en kvietaj terenoj, aŭ nokte en la domoj de ordinaraj personoj, se la dunadanoj dormus, aŭ ĉiuj irus la tombon?

» Kaj tamen ni ricevas malpli da dankoj ol vi. Vojaĝantoj malridas al ni, kaj kamparanoj havigas al ni malestimajn nomojn. "Paŝegulo" mi nomiĝas laŭ iu grasulo, kiu loĝas je unutaga marŝdistanco de malamikoj, kiuj frostigus lian koron, se li ne estus daŭre gardata. Tamen ni ne volus ŝanĝi tion. Se ordinaruloj malhavas zorgojn kaj timojn, ili restos ordinaraj, kaj ni devas esti sekretaj por ebligi tion al ili. Tio estis la tasko de mia parencaro, dum la jaroj longiĝis kaj la herbo kreskadis. Sed nun la mondo ŝanĝiĝas denove. Nova horo venas. La Plago Isildura estas trovita. Batalo baldaŭas. La Glavo estas reforĝota. Mi venos al Minaso Tirit.

— La Plago Isildura estas trovita, laŭ vi, — diris Boromiro. — Mi vidis helan ringon en la mano de l' Duonulo; sed Isilduro pereis ĉe la komenciĝo de tiu ĉi epoko, oni diras. Kiel scias la Saĝaj, ke ĝi estas lia ringo? Kaj kiel

ĝi trapasis la jarojn, ĝis ĝi portiĝis ĉi tien per kuriero tiel stranga?

— Tio estas rakontota, — diris Elrondo.

— Sed ankoraŭ ne, mi petas, Mastro! — diris Bilbo. — Jam la suno grimpas ĝis la zenito, kaj mi sentas bezonon de io por min fortigi.

— Vin mi ne nomis, — diris Elrondo ridetante. — Sed mi tion faras nun. Ek! Rakontu al ni vian historion. Kaj se vi ankoraŭ ne versigis vian rakonton, vi rajtas elparoli ĝin per senornamaj vortoj. Ju pli mallonge, des pli baldaŭ vi estos refreŝigita.

— Tre bone, — diris Bilbo. — Mi plenumos vian ordonon. Sed nun mi rakontos la historion veran, kaj se iuj ĉeestantoj aŭdis min rakonti ĝin alimaniere — li flankenrigardis al Gloino — mi petas, ke ili tion forgesu kaj min pardonu. Mi volas nur pretendi, ke la trezoro estis mia propraĵo en tiuj tagoj kaj liberiĝi de la nomo ŝtelinto, kiun oni direktis al mi. Sed eble mi jam komprenas iom pli bone. Ĉiuokaze, jen kio okazis.

Al kelkaj ĉeestantoj la historio estis tute nova, kaj ili aŭskultis mire dum la maljuna hobito, fakte ne tro malkontenta, rakontis tre detale sian aventuron kun Golumo. Eĉ unu enigmon li ne ellasis. Li estus rakontinta ankaŭ pri sia festo kaj malapero el la Provinco, se tio estus permesita; sed Elrondo levis sian manon.

— Bone rakontite, mia amiko, — li diris, — sed tiom provizore sufiĉas. Aktuale necesas scii nur, ke la Ringo pasis al Frodo, via heredinto. Nun parolu li!

Tiam, malpli volonte ol Bilbo, Frodo priskribis ĉiujn siajn traktadojn pri la Ringo ekde la tago, kiam ĝi pasis en lian posedon. Ĉiu paŝo de lia vojaĝo de Hobiturbo ĝis la Transpasejo Bruineno estas pridemandita kaj konsiderita, kaj ĉio, kion li povis memori pri la Nigraj Rajdantoj estis esplorita. Finfine li residiĝis.

— Ne malbone, — Bilbo diris al li. — Vi estus kreinta belan rakonton el ĝi, se oni ne daŭre interrompus. Mi provis fari kelkajn notojn, sed ni devos rediskuti ĝin inter ni iam, se mi estos ĝin priverkonta. Estas tutaj ĉapitroj da materialo eĉ antaŭ ol vi venis ĉi tien!

— Jes, ĝi iĝis rakonto sufiĉe longa, — respondis Frodo. — Sed la historio daŭre ne ŝajnas al mi kompleta. Mi ankoraŭ deziras ekscii sufiĉe multe, precipe pri Gandalfo.

Galdoro el la Havenoj, kiu sidis proksime, aŭdis lin.

— Vi parolas ankaŭ por mi, — li kriis kaj, turninte sin al Elrondo, diris, — la Saĝaj eble havas bonajn motivojn por kredi, ke la trovaĵo de l' Duonulo estas fakte la Granda Ringo multe pridebatita, eĉ se tio ŝajnas neprobabla al tiuj, kiuj scias malpli. Sed ĉu ni ne rajtas aŭdi ankaŭ la pruvojn? Kaj mi volas demandi ankaŭ pri Sarumano. Li estas klera pri la

historio de l’ Ringoj, tamen li ne ĉeestas. Kion li konsilas — se li scias tion, kion ni aŭdis?

— La demandoj, kiujn vi starigas, Galdoro, estas kunligitaj, — diris Elrondo. — Mi ne pretervidis ilin, kaj ili estos responditaj. Sed klarigi tiujn ĉi aferojn estas la tasko de Gandalfo; kaj mi alvokas lin laste, ĉar tio estas la honorloko, kaj pri tiu ĉi tuta afero li estis la ĉefo.

— Iuj, Galdoro, — diris Gandalfo, — taksus la novaĵojn de Gloino, kaj la persekutadon de Frodo, sufiĉa pruvo, ke la trovaĵo de l’ duonulo estas io ege valora al la Malamiko. Tafcen ĝi estas ringo. Do kio? La Naŭon tenas la Nazguloj. La Sepo estas kaptita aŭ detruita. — Tiam Gloino ekmoviĝis, sed ne parolis. — Pri la Trio ni scias. Kio do estas tiu ĉi, kiun li tiom deziras?

» Ekzistas efektive vasta dezertejo da tempo inter la Rivero kaj la Monto, inter la perdo kaj la trovo. Sed la breĉo en la sciaro de l’ Saĝaj estas fine plenigita. Tamen tro malrapide. Ĉar la Malamiko sekvis tutproksime, eĉ pli proksime ol mi timis. Kaj tre bone estas, ke ne ĝis la nuna jaro, la nuna somero mem verŝajne, ke la plenan veron li eksciis.

» Iuj ĉeestantoj certe memoras, ke antaŭ multaj jaroj mi mem aŭdacis trapasi la pordojn de la Nekromanciisto en Dol Gulduro, kaj sekrete esploris ties morojn, kaj tiel trovis, ke niaj timoj estis ĝustaj: li estis neniu alia ol Saŭrono, nia Malamiko el pratempo, denove ekhavinta formon kaj potencon. Iuj memoras ankaŭ, ke Sarumano persvadis nin ne agi kontraŭ lin aperte, kaj longe ni nur spionis lin. Tamen fine, dum lia ombro kreskis, Sarumano cedis, kaj la Konsilio ekagis per sia forto kaj forpelis el Mornarbaro la misaĵon — kaj tio okazis dum la jaro mem de la trovo de tiu ĉi Ringo: stranga hazardo, se pri hazardo temis.

» Sed ni tro malfruis, kiel antaŭvidis Elrondo. Saŭrono reciproke spionis nin kaj longe prepariĝis kontraŭ nia atako, regante Mordoron de malproksime per Minaso Morgul, kie loĝis liaj Naŭ Servistoj, ĝis ĉio estis preta. Tiam li cedis antaŭ ni, sed nur ŝajnigis fuĝi, kaj baldaŭ poste venis al la Malhela Turo kaj malkaŝe deklaris sin. Tiam la lastan fojon kunvenis la Konsilio; ĉar jam ni eksciis, ke li serĉas ĉiam pli avide la Umm. Ni timis tiam, ke li posedis ian scion pri ĝi, kiun ni ne posedis. Sed Sarumano diris, ke ne, kaj ripetis tion, kion li antaŭe diris al ni: la Unu neniam plu troviĝos en Mez-Tero.

» “En plej malbona okazo, — li diris, — nia Malamiko scias, ke ni ne havas ĝin, kaj ke ĝi estas ankoraŭ perdita. Sed kio perdiĝis, tion oni eble trovos, li supozas. Ne timu! Lia espero trompos lin. Ĉu mi ne serioze esploris la aferon? En Anduinon la Grandan ĝi falis; kaj antaŭlonge, dum Saŭrono dormis, ĝi estis rulita laŭ la Rivero en la Maron. Tie lasu ĝin kuŝi ĝis la Fino”.

Gandalfo silentiĝis, fiksrigardante orienten de la vestiblo al la foraj pintoj de la Nebulecaj Montoj, ĉe kies grandaj fundoj la minaco al la mondo tiom longe kuŝis kaŝite. Li ĝemspiris.

— Pri tio mi kulpis, — li diris. — Min lulis la vortoj de Sarumano la Saĝa; sed mi devis serĉi pli frue la veron, kaj nia danĝero jam estus malplia.

— Ni ĉiuj kulpis, — diris Elrondo, — kaj sen via atentemo la Mallumo, eble, jam trafus nin. Sed daŭrigu!

— Ekde la komenco mia koro dubis, kontraŭ ĉiuj konataj kialoj, — diris Gandalfo, — kaj mi volis scii, kiel tiu afero alvenis al Golumo, kaj kiom longe li posedis ĝin. Do mi starigis gvatadon pri li, konjektante, ke postnelonge li elvenos el sia mallumo por serĉi sian trezoron. Li ja venis, sed li eskapis kaj oni ne trovis lin. Kaj poste, ho ve! mi lasis ripozi la aferon, nur observante kaj atendante, kiel ni tro ofte faris.

» La tempo pasis kun multaj zorgoj, ĝis miaj duboj vekiĝis denove al subitaj timoj. De kie venis la ringo de l' hobito? Kio, se mia timo aŭtentis, estis farenda pri ĝi? Tiajn aferojn mi devis decidi. Sed pri mia antaŭtimo mi parolis ankoraŭ al neniu, sciante la danĝeron de maloportuna flustro, se ĝi misdirektiĝus. En ĉiuj longaj militoj kontraŭ la Malhela Turo la perfidoj estis ĉiam nia plej granda malamiko.

» Tio okazis antaŭ dek sep jaroj. Baldaŭ mi konstatis, ke spionoj ĉiaspecaj, eĉ bestoj kaj birdoj, estis kuniĝintaj ĉirkaŭ la Provinco, kaj mia timo pligrandiĝis. Mi petis helpon de la dunadanoj, kaj ili duobligis sian gardadon; kaj mi malfermis mian koron al Aragorno, la heredinto de Isilduro.

— Kaj mi, — diris Aragorno, — konsilis, ke ni serĉu Golumon, eĉ se ŝajnus tro malfrue. Kaj ĉar ŝajnis konvene, ke la heredinto de Isilduro laboru por ripari la kulpofaron de Isilduro, mi akompanis Gandalfon dum la longa kaj senespera serĉado.

Poste Gandalfo rakontis, kiel ili esploris la tutan longon de Sovaĝujo, eĉ ĝis la Montoj de Ombro kaj la bariloj de Mordoro.

— Tie ni aŭdis famon pri li, kaj ni konjektas, ke longe li loĝis tie en la malhelaj montoj; sed ni neniam trovis lin, kaj fine ni malesperis. Kaj poste, dum mia malespero, mi pensis denove pri testo, kiu eble nenecesigos trovon de Golumo. La ringo mem povus indiki, ke ĝi estas la Unu. Revenis al mi memoro pri vortoj en la Konsilio: vortoj de Sarumano, tiutempe atentitaj nur duone. Nun mi reaŭdis ilin klare en mia koro:

» "La Naŭ, la Sep, kaj la Tri, — li diris, — ĉiu posedis sian propran gemon. Ne tiel ĉe la Unu. Ĝi estis ronda kaj senornama, kvazaŭ ĝi estus unu el la malpligravaj ringoj, sed ĝia farinto ĉizis sur ĝi markojn, kiujn la spertuloj eble povus ankoraŭ vidi kaj legi".

» Kiaj estis tiuj markoj li ne diris. Kiu scius nun? La farinto. Kaj Sarumano? Tamen kvankam ties scioj estas grandaj, ili devis havi fonton. Kies mano krom tiu de Saŭrono iam tenis ĉi aĵon, antaŭ ol ĝi perdiĝis? Nur la mano de Isilduro.

» Je tiu penso, mi rezignis pri la ĉaso, kaj iris rapide al Gondoro. En antaŭaj tagoj anoj de mia ordeno estis ĝentile akceptitaj tie, sed plej ĝentile Sarumano. Ofte li dumlonge gastis ĉe la Mastroj de l' Urbo. Malpli entuziasme ol antaŭe, nun min bonvenigis mastro Denetoro, kaj nevolonte li permesis, ke mi serĉu inter liaj amasigitaj rulskribaĵoj kaj libroj.

» "Se efektive vi serĉas nur, kiel vi diras, arĥivojn de l' antikva tempo, kaj la komenciĝon de l' Urbo, legadu! — li diris. — ĉar al mi tio, kio estis, malpli malhelas ol tio, kio okazos, kaj tio estas mia zorgo. Sed, se vi ne posedas pli da klero ol Sarumano, kiu longe studis ĉi tie, vi trovos nenion ne bone konatan al mi, ĉar mi mastras la tradiciaron de tiu ĉi Urbo".

» Tiel parolis Denetoro. Kaj tamen troviĝas en liaj amasaĵoj multaj arĥivoj legeblaj jam de malmultaj, eĉ inter la tradicio-mastroj, ĉar ties skribmanieroj kaj lingvoj iĝis mallumaj al la posteuloj. Kaj, Boromiro, kuŝas ankoraŭ en Minaso Tirit nelegite, mi supozas, de iu ajn krom Sarumano kaj mi mem depost la malvenko de la reĝoj, rulskribaĵo farita de Isilduro mem. Ĉar Isilduro ne formarŝis tuj el la milito kontraŭ Mordoro, kiel la historion rakontis iuj.

— Iuj en la nordo, eble, — Boromiro intermetis. — Ĉiuj en Gondoro scias, ke li iris unue al Minaso Anor kaj loĝis dum kelka tempo kun sia nevo Meneldilo, instruante lin, antaŭ ol li transdonis al li regadon de la Suda Reĝlando. En tiu tempo li plantis tie la lastan arbidon de la Blanka Arbo memore al sia frato.

— Sed en tiu tempo li faris ankaŭ tiun rulskribaĵon, — diris Gandalfo; — kaj tion oni ne memoras en Gondoro, verŝajne. Ĉar tiu rulskribaĵo koncernas la Ringon, kaj tiel skribis Isilduro sur ĝi:

> La Granda Ringo nun iĝos heredaĵo de la Norda Reĝlando; sed kroniko pri ĝi estos lasita en Gondoro, kie ankaŭ loĝas la heredintoj de Elendilo, por la okazo, ke venos tempo, kiam memoro pri ĉi gravaj aferoj malheliĝos.

» Kaj post tiuj vortoj Isilduro priskribis la Ringon, kia li trovis ĝin.

> Ĝi estis varmega, kiam mi unue prenis ĝin, cindre varmega, kaj mia mano estis ekbruligita tiom, ke mi dubas iam ajn liberiĝi de ties doloro. Tamen eĉ dum mi skribas ĝi malvarmiĝis, kaj ĝi ŝajnas ŝrumpi, kvankam ĝi perdas nek sian belon nek sianformon. Jam la surskribajo, kiu komence estis klara kiel ruĝa flamo, forvelkas kaj jam estas apenaŭ legebla. Ĝi estas farita per la elf-skribmaniero de Eregiono, ĉar mankas literoj en Mordoro por verkado tiel

subtila; sed la lingvo estas nekonata al mi. Mi taksas ĝin lingvo el la Nigra Lando, ĉar ĝi estas aĉa kaj mallerta. Kian mison ĝi esprimas, mi ne scias; sed mi kopias ĝin ĉi tie, timante ke ĝi velkos preter revenigeblo. Al la Ringo mankas, eble, la varmeco de l' mano de Saŭrono, kiu estis nigra kaj tamen brulis kvazaŭfajro, kaj do Gil-Galado estis detruita; kaj eble se la oro estus revarmigita, la skribaĵo estus refreŝigita. Sed miaparte mi ne volas riski domaĝon de tiu ci aĵo: la sola bela, el la verkoj de Saŭrono. Ĝi estas al mi valora, kvankam mi aĉetis ĝin per granda doloro.

» Kiam mi tralegis tiujn vortojn, mia serĉado finiĝis. Ĉar la kopiita skribo ja estis tia, kia ĝin konjektis Isilduro, en la lingvo de Mordoro kaj la servistoj de la Turo. Kaj tio, kio estis dirita tie, estis jam konata. Ĉar en la tago, kiam Saŭrono la unuan fojon surmetis la Unun, Celebrimboro, farinto de la Trio, rimarkis lin, kaj de malproksime aŭdis lin elparoli tiujn vortojn, kaj sekve liaj misaj celoj estis rivelitaj.

» Mi tuj adiaŭis Denetoron, sed ĝuste kiam mi iris norden, sciigoj atingis min el Lorieno, ke Aragorno jam iris tiun vojon, kaj ke li trovis la kreaĵon nomatan Golumo. Tial mi iris unue renkonten al li por aŭdi lian raporton. En kiajn terurajn danĝerojn li iris sola, mi ne riskis konjekti.

— Ne multe necesas rakonti pri ili, — diris Aragorno. — Se necesas, ke iu marŝu videble de la Nigra Pordo, aŭ surpaŝu la mortigajn florojn de Morgula Valo, tiu nepre renkontos danĝerojn. Ankaŭ mi fine malesperis, kaj mi komencis mian vojaĝon hejmen. Kaj tiam, bonŝance, mi subite trovis la serĉitaĵon: postsignojn de molaj piedoj apud koteca lageto. Sed nun la spuro estis freŝa kaj rapida, kaj ĝi kondukis ne al Mordoro sed malal. Laŭ la randoj de l' Mortigaj Marĉoj mi sekvis ĝin, kaj poste mi kaptis lin. Embuskante apud stagna lageto, enrigardante la akvon kiam la vespero mallumiĝis, mi kaptis lin, Golumon. Li estis kovrita de verda ŝlimo. Li neniam amos min, bedaŭrinde; ĉar li mordis min, kaj mi ne traktis lin milde. Nenion alian mi iam akiris el lia buŝo, ol la postsignojn de liaj dentoj. Mi juĝis tion la plej malbona parto de mia vojaĝo, la vojon returnen, gardante lin tage kaj nokte, devigante lin marŝi antaŭ mi kun ŝnuro ĉirkaŭ la kolo, kaj la buŝo ŝtopita, ĝis lin malsovaĝigis manko de trinkaĵoj kaj manĝaĵoj, pelante lin ĉiam direkte al Mornarbaro. Mi kondukis lin tien finfine kaj transdonis lin al la elfoj, ĉar ni interkonsentis, ke tiel estu; kaj mi ĝojis liberiĝi de lia kunesto, ĉar li fetoris. Miaparte mi esperas neniam plu alrigardi lin; sed Gandalfo venis kaj toleris longan interparolon kun li.

— Jes, longan kaj lacigan, — diris Gandalfo, — sed ne senprofitan. Ekzemple, tio, kion li rakontis pri sia perdo, akordis kun tio, kion Bilbo nun la unuan fojon rakontis malkaŝe; sed tio ne multe gravis, ĉar mi jam divenis ĝin. Sed mi eksciis tiam unue, ke la ringo de Golumo elvenis la Grandan

Riveron proksime al la Iridaj Kampoj. Kaj mi eksciis ankaŭ, ke li longe posedis ĝin. Multajn vivdaŭrojn de lia eta specio. La potenco de la Ringo plimultigis liajn jarojn longe super la normo, kaj tiun potencon donas nur la Grandaj Ringoj.

» Kaj se tio ne estas sufiĉa pruvo, Galdoro, ekzistas tiu alia testo, pri kiu mi parolis. Sur tiu ĉi Ringo mem, kiun vi vidis ĉi tie altetenata, ronda kaj senornama estas ankoraŭ legeblaj la literoj raportitaj de Isilduro, se oni havas volforton por enfajrigi la oraĵon. Tion mi jam faris, kaj mi legis jenon:

Ash nazg durbatulûk, ash nazg gimbatul
ash nazg thrakatulûk agh burzum-ishi krimpatul

La ŝanĝiĝo de l' voĉo de la sorĉisto estis miriga. Subite ĝi iĝis minaca, potenca, ŝtone dura. Ombro ŝajnis surpaŝi la altan sunon, kaj momente mallumiĝis en la vestiblo. Ĉiuj tremis, kaj la elfoj kovris siajn orelojn.

— Neniam antaŭe iu voĉo aŭdacis paroli vortojn de tiu lingvo en Imladriso, Gandalfo la Griza, — diris Elrondo, dum la ombro preterpasis kaj la ĉeestantoj denove ekspiris.

— Kaj ni esperu, ke neniu iam ajn denove parolos ĝin ĉi tie, — respondis Gandalfo. — Tamen mi ne petas vian pardonon, Mastro Elrondo. Ĉar por ke tiu lingvo ne estu baldaŭ aŭdota en ĉiu angulo de la okcidento, ni flankenlasu ĉiun dubon, ke tiu ĉi aĵo estas fakte tio, kion deklaris la Saĝaj: la trezoro de la Malamiko, plena je lia tuta malico; kaj en ĝi kuŝas granda parto de lia prapotenco. El la Nigraj Jaroj venas la vortoj aŭditaj de la forĝistoj de Eregiono, kiuj sciigis, ke ili estas perfiditaj:

Unu Ringo ilin regas. Unu ilin prenas.
Unu Ringo en mallumon ilin gvidas kaj katenas.

» Sciu krome, miaj amikoj, ke mi eksciis ankoraŭ pli de Golumo. Li malvolonte parolis, kaj lia rakonto estis neklara, sed estas tute sendube, ke li iris al Mordoro, kaj tie ĉiuj liaj konoj estis elpremitaj el li. Sekve la Malamiko jam scias, ke la Unu estas trovita, kaj ke dumlonge ĝi estis en la Provinco; kaj pro tio, ke liaj servistoj persekutis ĝin preskaŭ ĝis nia pordo, li scios baldaŭ, aŭ eble jam scias, ĝuste dum mi parolas, ke ni havas ĝin ĉi tie.

Ĉiuj sidis silente dum kelka tempo, ĝis fine Boromiro ekparolis.

— Li estas specio eta, laŭ vi, tiu Golumo? Eta, sed plena je malico. Kio okazis al li? Kian sorton vi difinis al li?

— Li estas en karcero, sed nenio pli malbona, — diris Aragorno. — Li multe suferis. Tute sendube li estis torturata, kaj timo pri Saŭrono kuŝas nigre sur lia koro. Tamen, almenaŭ mi ĝojas, ke li estas sekure gardata de la atentaj elfoj de Mornarbaro. Lia malico estas granda kaj havigas al li forton

apenaŭ kredeblan pri iu tiom maldika kaj velkinta. Li povus ankoraŭ realigi multe da misaĵo, se li estus libera. Kaj mi ne dubas, ke al li estis permesate forlasi Mordoron pro iu misa komisio.

— Ve, ho ve! — kriis Legolaso, kaj sur lia bela elfa vizaĝo vidiĝis granda malĝojo. — La novaĵo, kiun oni sendis min alporti, estas nun sciigenda. Ĝi ne estas bona, sed nur ĉi tie mi eksciis, kiom misa ĝi ŝajnos al tiu ĉi ĉeestantaro. Smeagolo, kiu nun nomiĝas Golumo, eskapis.

— Ĉu eskapis? — kriis Aragorno. — Tio estas novaĵo ja malbona. Ni ĉiuj amare bedaŭros tion, timinde. Kiel okazis, ke la Tranduilanoj malsukcesis pri sia komisio?

— Ne pro manko de atento, — diris Legolaso, — sed eble pro troa bonkoreco. Kaj ni timas, ke la kaptito ricevis helpon de aliaj, kaj ke pli estas konata pri nia agado, ol ni dezirus. Ni gardis tiun kreaĵon tage kaj nokte laŭ ordono de Gandalfo, kvankam ni tre laciĝis pri la tasko. Sed Gandalfo diris, ke ni esperu plu pri lia reboniĝo, kaj ni ne sufiĉe severis por teni lin daŭre en karcero subtera, kie li reakirus siajn iamajn nigrajn pensojn.

— Vi estis malpli sentemaj al mi, — diris Gloino kun okulflagro, ĉar malnovaj memoroj estis vekitaj pri lia enkarceriĝo en la profundaĵoj de la haloj de l' elf-reĝo.

— Nu, paŭzu! — diris Gandalfo. — Mi petas, ne interrompu, bona Gloino. Tio estis bedaŭrinda miskompreno, delonge rebonigita. Se ĉiuj plendoj, kiuj ekzistas inter elfoj kaj gnomoj, estos restarigitaj ĉi tie, prefere ni rezignu pri tiu ĉi Konsiliĝo.

Gloino stariĝis kaj riverencis, kaj Legolaso daŭrigis.

— En tagoj belveteraj ni kondukis Golumon tra la arbaro; kaj tie troviĝis alta arbo, kiu staris sola disde l' aliaj, kiun li ŝatis grimpi. Ofte ni permesis, ke li grimpu ĝis la plej altaj branĉoj, ĝis li sentis la liberan venton; sed ni starigis gardantojn piede de l' arbo. Iun tagon li rifuzis malsupreniĝi, kaj la gardantoj ne emis sekvi lin grimpe: li lernis kroĉiĝi al branĉoj per la piedoj same kiel per la manoj; do ili sidis apud la arbo profunde en la nokton.

» Okazis ĝuste en tiu nokto somera, tamen senluna kaj senstela, ke atakis neatendite nin orkoj. Ni forpelis ilin post kelka tempo; ili estis multaj kaj batalemaj, sed ili venis el la montoj, kaj ne kutimis al arbaro. Kiam finiĝis la batalo, ni konstatis, ke Golumo estas foririnta, kaj liaj gardintoj estis mortigitaj aŭ kaptitaj. Tiam ŝajnis al ni klare, ke oni atakis por lin savi, kaj ke li sciis anticipe pri ĝi. Kiel oni aranĝis tion, ni ne povas diveni; sed Golumo estas ruza, kaj la spionoj de la Malamiko multnombras. La mallumaĵoj, kiuj estis forpelitaj dum la jaro de la malvenko de l' Drako, revenis pli multnombre, kaj Mornarbaro estas denove loko misa, krom tie,

kie nia regno estas daŭrigata.

» Ni malsukcesis rekapti Golumon. Ni trovis lian spuron inter tiuj de multaj orkoj, kaj ĝi plonĝis profunden en la Arbaron, laŭ suda direkto. Sed postnelonge ĝi evitis nian spertecon, kaj ni ne riskis daŭrigi la persekuton; ĉar ni proksimiĝis al Dol Gulduro, kaj tio estas ankoraŭ loko tre misa; tien ni ne iras.

— Nu, do, li foriris, — diris Gandalfo. — Mankas al ni tempo por serĉi lin denove. Li faru, kion li volas. Sed li eble ludos iam rolon, kiun nek li nek Saŭrono antaŭvidis. Kaj nun mi respondos la aliajn demandojn de Galdoro. Kio pri Sarumano? Kion li konsilas al ni pri tiu ĉi krizo? Tiun ĉi rakonton mi devas plenripeti, ĉar ĝis nun aŭdis ĝin nur Elrondo, kaj eĉ li nur mallonge; sed ĝi koncernos ĉion, kion ni devas solvi. Ĝi estas la lasta ĉapitro en la Historio de l' Ringo, kiom ĝi progresis ĝis nun.

» Fine de junio mi estis en la Provinco, sed nubo da zorgoj okupis mian menson, kaj mi rajdis ĝis la sudaj limoj de la landeto; ĉar mi antaŭsentis iun danĝeron, ankoraŭ kaŝitan al mi sed proksimiĝantan. Tie mesaĝoj atingis min, kiuj sciigis min pri milito kaj malvenko en Gondoro, kaj kiam mi aŭdis pri la Nigra Ombro, mia koro frostiĝis. Sed mi trovis nenion krom kelkaj fuĝintoj el la Sudo; tamen ŝajnis al mi, ke okupis ilin timo, pri kiu ili rifuzis paroli. Mi turnis min poste okcidenten kaj norden kaj vojaĝis laŭ la Verdvojo; kaj ne malproksime de Brio mi renkontis vojaĝanton sidantan sur teramaso apud la vojo kun lia paŝtiĝanta ĉevalo apude. Tiu estis Radagasto la Bruna, kiu iam loĝis en Rosgobelo, proksime al la randoj de Mornarbaro. Li apartenas al mia ordeno, sed mi ne vidis lin dum multaj jaroj.

» "Gandalfo! — li kriis. — Mi vin serĉis. Sed mi estas fremdulo ĉi-regione. Mi sciis nur, ke vi eble troveblos en sovaĝa regiono, kies kruda nomo estas Provinco".

» "Via informo estis ĝusta, — mi diris. — Sed ne esprimu ĝin tiel, se vi renkontos iujn enloĝantojn. Vi estas jam proksima al la limoj de l' Provinco. Kaj kion do vi deziras ĉe mi? Certe estas urĝa. Vi neniam emis vojaĝi, krom pelite de urĝa neceso".

» "Mi havas urĝan komision, — li diris.— Mia novaĵo estas misa. — Poste li ĉirkaŭrigardis, kvazaŭ la dornbariloj havus orelojn. — Nazguloj. La Naŭ denove elvenis. Ili transiris sekrete la Riveron kaj progresas okcidenten. Ili alivestiĝis kiel nigraj rajdantoj".

» Mi tiam sciis tion, kion mi timis ne sciante ĝin.

» "La Malamiko certe havas iun grandan bezonon aŭ celon, — diris Radagasto, — sed kio igas lin turniĝi al ĉi tiuj malproksimaj kaj dezertaj regionoj, tion mi ne povas diveni".

» "Kion vi celas?" — mi diris.

» "Oni diris al mi, ke kien ajn ili iras la Rajdantoj petas sciigojn pri lando nomata Provinco".

» "*La* Provinco, — mi diris, sed mia koro ŝrumpis. Ĉar eĉ la Saĝaj eble timus kontraŭstari la Naŭon, kiam tiuj kuniĝas sub sia terura ĉefo. Granda reĝo kaj sorĉisto li estis praepoke, kaj nun li kaŭzas timegon. — Kiu diris al

vi, kaj kiu sendis vin?”

» “Sarumano la Blanka, — respondis Radagasto. — Kaj li diris, ke mi sciigu vin, ke se vi sentas bezonon, li helpos; sed vi devas tuj peti lian helpon, alie estos tro malfrue”.

» Kaj tiu mesaĝo alportis al mi esperon, ĉar Sarumano la Blanka estas la plej granda en mia ordeno. Radagasto estas, kompreneble, inda sorĉisto, majstro de formoj kaj kolorŝanĝoj; kaj li estas tre klera pri kuracherboj kaj bestoj, kaj precipe birdoj estas liaj amikoj. Sed Sarumano delonge studis la artojn de la Malamiko mem, kaj tiel ni ofte povis antaŭbari lin. Ĝuste per la rimedoj de Sarumano ni forpelis lin el Dol Gulduro. Povus esti, ke li trovis armilojn, kiuj kapablus fuĝigi la Naŭon.

» “Mi iros al Sarumano”, — mi diris.

» “Do vi devas iri *jam nun*, — diris Radagasto; — ĉar mi malŝparis tempon vin serĉante, kaj la tagoj elĉerpiĝas. Al mi estis ordonite trovi vin antaŭ la someromezo, kaj tiu jam alestas. Eĉ se vi ekiros de tiu ĉi loko, vi apenaŭ atingos lin antaŭ ol la Naŭ trovos la landon, kiun ili serĉas. Mi mem tuj reiros”. Tion dirinte, li surĉevaliĝis kaj intencis forrajdi.

» “Atendu momenton! — mi diris. — Ni bezonos vian helpon, kaj la helpon de ĉiu, kiu volos doni ĝin. Elsendu mesaĝojn al ĉiuj bestoj kaj birdoj, kiuj estas viaj amikoj. Diru, ke ili alportu sciigojn pri ĉio, kio koncernas tiun ĉi aferon al Sarumano kaj Gandalfo. Mesaĝoj estu sendataj al Ortanko”.

» “Mi tion faros”, li diris, kaj forrajdis kvazaŭ la Naŭ lin persekutus.

» Mi ne povis sekvi lin senprokraste. Mi jam rajdis tre multe en tiu tago, kaj mi estis tiel laca, kiel mia ĉevalo, kaj mi bezonis pripensi la aferojn. Mi tranoktis en Brio, kaj decidis, ke mankas tempo reveni al la Provinco. Neniam mi pli grave eraris!

» Tamen mi skribis mesaĝon al Frodo, kaj fidis, ke mia amiko tavernestro sendos ĝin al li. Mi forrajdis je aŭroro; kaj mi alvenis finfine al la loĝejo de Sarumano. Tiu troviĝas forsude en Isengardo, ĉe fino de l’ Nebulecaj Montoj, ne malproksime de la Breĉo de Rohano. Kaj Boromiro povas konfirmi, ke temas pri larĝa aperta valo, kiu kuŝas inter la Nebulecaj Montoj kaj la plejnordaj antaŭmontetoj de Ered Nimrajso, la Blankaj Montoj de lia hejmo. Sed Isengardo estas cirklo de nudaj rokoj, kiuj enfermas valon kvazaŭ per muro, kaj meze de tiu valo troviĝas turo el ŝtono, nomita Ortanko. Ĝin konstruis ne Sarumano, sed la homoj de Numenoro antaŭlonge; kaj ĝi estas tre alta kaj posedas multajn sekretojn; tamen ĝi aspektas kvazaŭ ne verko metia. Ĝi ne estas alirebla, krom per trapaso de la cirklo de Isengardo; kaj en tiu cirklo estas nur unu pordo.

» Malfrue en iu vespero mi alvenis tiun pordon similan al granda arkaĵo

en la roka muro; kaj ĝi estis forte gardata. Sed la pordogardantoj atendis min kaj sciigis, ke atendas min Sarumano. Mi rajdis sub la arkaĵon, kaj la pordo fermiĝis silente malantaŭ mi, kaj subite mi ektimis, kvankam nenio motivigis tion.

» Sed mi rajdis ĝis la subo de Ortanko, kaj alvenis la ŝtuparon de Sarumano; kaj tie li renkontis min kaj kondukis min ĝis sia alta ĉambro. Sur sia fingro li portis ringon.

» “Do vi alvenis, Gandalfo”, — li diris al mi seriozmiene, sed ŝajnis, ke en lia okulo estas blanka lumo, kvazaŭ en lia koro estus frida ridemo.

“Jes, mi alvenis, — mi diris. — Mi alvenis serĉante vian helpon, Sarumano la Blanka”. Ŝajnis, ke tiu titolo kolerigis lin.

“Ĉu vi efektive tion faris, Gandalfo la *Griza*! — li mokis. — Ĉu helpon? Oni malofte aŭdis, ke Gandalfo la Griza petas helpon, ĉar li estas ruza kaj saĝa, travagas la landojn kaj sin koncernas pri ĉiaj aferoj, ĉu aŭ ne ili apartenas al li”.

» Mi alrigardis lin scivole.

» “Sed se mi ne eraras, — mi diris, — ekiĝas nun aferoj, kiuj postulos unuigon de nia tuta forto”.

» “Tio povas esti, — li diris, — sed tiu penso venas al vi malfrue. Kiom longe, mi scivolas, vi kaŝis al mi, estro de l’ Konsilio, aferon plejeble gravan? Kio vin alportis nun el via kaŝejo en la Provinco?”

» “La Naŭ elrajdis denove, — mi respondis. — Ili transiris la Riveron. Tion diris al mi Radagasto”.

» “Radagasto la Bruna! — ridis Sarumano, kaj li ne plu kaŝis sian malestimon. — Radagasto la Birdo-mildiganto! Radagasto la Simpla! Radagasto la Stultulo! Tamen li posedis sufiĉe da kapablo por ludi la rolon, kiun mi difinis al li. Ĉar vi alvenis, kaj tio estis la tuta celo de mia mesaĝo. Kaj ĉi tie vi restos, Gandalfo la Griza, kaj ripozos post viaj vojaĝoj. Ĉar mi estas Sarumano, la Saĝa, Sarumano Ringfarinto, Sarumano la Multkolora!”

» Tiam mi alrigardis kaj vidis, ke liaj vestaĵoj, kiuj ŝajnis blankaj, ne estis tiaj, sed estis teksitaj el ĉiuj koloroj, kaj kiam li moviĝis ili muaris kaj ŝanĝis la koloron, tiel ke la okuloj estis konfuzitaj.

» “Pli plaĉis al mi blanka”, — mi diris.

» “Blanka! — li rikanis. — Tiu sufiĉas kiel komenco. Blankan ŝtofon oni povas kolorigi. Blanka paĝo povas esti surskribata; kaj blanka lumo estas rompebla”.

» “En tiu kazo ĝi ne plu estas blanka, — diris mi. — Kaj tiu, kiu ion rorapas por eltrovi kio ĝi estas, forlasis la vojon de la saĝo”.

» “Ne necesas paroli al mi tiel, kiel vi alparolas stultulojn el via amikaro, — li diris. — Mi ne kondukis vin ĉi tien por min instrui, sed por

doni al vi elekton”.

» Li rektigis sin kaj komencis deklami, kvazaŭ li farus paroladon longe antaŭpreparitan:

» “Foriris la Praaj Tagoj. La Mezaj Tagoj pasas. La Plijunaj Tagoj komenciĝas. La epoko de la elfoj finiĝis, sed nia epoko alestas: la mondo de la homoj, kiun ni devas regi. Sed ni devas havi potencon, potencon ordigi ĉiujn aferojn laŭ nia volo, por tiu bono, kiun nur la Saĝaj kapablas vidi. Aŭskultu, Gandalfo, mia malnova amiko kaj helpinto! — li diris, proksimiĝante kaj nun parolante per voĉo pli mallaŭta. — Mi diris *ni*, ĉar povas esti *ni*, se vi aliĝos al mi. Leviĝas nova potenco. Kontraŭ ĝi la malnovaj aliancanoj kaj politikoj nin tute ne helpos. Restas neniom da espero en elfoj aŭ mortanta Numenoro. Tio ĉi estas elekteblo antaŭ vi, antaŭ ni. Ni povas aliĝi al tiu Potenco.

Estus sagace, Gandalfo. Laŭ tiu vojo troviĝas espero. Ĝia venko proksimiĝas; kaj por tiuj, kiuj ĝin kunhelpis, estos riĉa rekompenco. Dum la Potenco kreskos, ĝiaj pruvitaj amikoj ankaŭ kreskos; kaj la Saĝaj, kiel vi kaj mi, povos per pacienco veni fine ĝis gvidado de ĝiaj direktiĝoj. Ni povos atendadi, ni povos kaŝi en la koroj niajn pensojn, eble bedaŭrante misojn faratajn survoje, sed aprobante la altan kaj finan celon: Scio, Regado, Ordo; ĉio, por kio ni ĝis nun klopodis vane, malhelpataj anstataŭ helpataj de niaj malfortaj aŭ pigraj amikoj. Ne necesus, ne estus, reala ŝanĝiĝo de niaj intencoj, nur de niaj rimedoj”.

» “Sarumano, — mi diris, — mi aŭdis pli frue tiajn paroladojn, sed nur el la buŝoj de komisiitoj senditaj el Mordoro por trompi la nesciantojn. Mi ne supozas, ke vi alvenigis min tiom foren nur por enuigi miajn orelojn”.

» Li rigardis min gvate, kaj paŭzis pripensante: “Nu, mi konstatas, ke tiu saĝa proceduro ne rekomendas sin al vi, — li diris. — Ankoraŭ ne? Ne se iu metodo pli bona povas esti elpensita?”

» Li alvenis kaj metis sian longan manon sur mian brakon kaj flustris: “Kaj kial ne, Gandalfo? Kial ne? La Reganta Ringo? Se tiun ni povus estri, tiam la Potenco transirus al *ni*. Jen vere kial mi kondukis vin ĉi tien. Ĉar min servas multaj okuloj, kaj mi opinias, ke vi scias la nunan situon de tiu valora objekto. Ĉu ne tiel? Aŭ kial la Naŭ demandas pri la Provinco, kaj kio koncernas vin tie?” Kiam li diris tion, avidego, kiun li ne povis kaŝi, subite ekbrilis en liaj okuloj.

» “Sarumano, — mi diris, distancigante min de li, — nur unu mano povas utiligi la Unun, kaj tion vi bone scias, do ne ĝenu vin diri *ni*! Sed al vi mi ne donus ĝin, ne, eĉ novaĵon pri ĝi, nun ekkoninte viajn pensojn. Vi estis estro de l’ Konsilio, sed fine vi jam senmaskigis vin. Nu, la elekto estas verŝajne: submetiĝi al Saŭrono aŭ al vi. Mi elektas neniun el ambaŭ. Ĉu vi

povas proponi aliajn?”

» Jam li estis malvarma kaj danĝera. “Jes, — li diris. — Mi ne atendis, ke vi montros saĝecon, eĉ proprasorte, sed mi donis al vi eblecon helpi min volonte, tiel ŝparonte al vi multe da ĝeno kaj doloro. La tria elekto estas resti ĉi tie, ĝis la fino”.

» “Ĝis kiu fino?”

» “Ĝis vi sciigos al mi, kie la Unu estas trovebla. Mi eble trovos rimedojn por persvadi vin. Aŭ ĝis ĝi estos trovita malgraŭ vi, kaj la Reganto disponos tempon por sin turni al aferoj malpli gravaj; por elpensi, ekzemple, taŭgan rekompencon por la malhelpado kaj impertinento de Gandalfo la Griza”.

» “Tio eble ne pruviĝos iu el la aferoj malpli gravaj”, — mi diris. Sed li mokridis min, ĉar miaj vortoj estis senenhavaj, kaj tion li sciis.

» Ili prenis min kaj ili lokigis min sola sur la pinto de Ortanko, sur la loko, kie Sarumano kutimis observi la stelojn. Mankas malsuprenirejo krom per mallarĝa ŝtuparo plurmilŝtupa, kaj la suba valo ŝajnas tre malproksima. Mi rigardis al ĝi kaj vidis, ke kvankam iam ĝi estis verda kaj bela, nun ĝi estis plenplena de ŝaktoj kaj forĝejoj. Lupoj kaj orkoj estis loĝigitaj en Isengardo, ĉar Sarumano estis kuniganta grandan armeon proprakonte, rivale al Saŭrono kaj ankoraŭ ne por servi lin. Super lia tuta laborejaro pendis malhela fumo, kiu volviĝis ĉirkaŭ la flankoj de Ortanko. Mi staris sola sur insulo en la nuboj; kaj eskapeblecon mi ne havis, kaj miaj tagoj estis amaraj. Min trapikis malvarmo, kaj mi disponis nur malmulte da spaco por paŝi tien-reen, meditante pri la alveno de l’ Rajdantoj al la Nordo.

» Ke la Naŭ efektive leviĝis, mi estis certa, senkonsidere pri la vortoj de Sarumano, kiuj povus esti mensogaj. Longe antaŭ ol mi venis en Isengardon, mi aŭdis sciigojn survoje, kiuj ne povis esti eraraj. Timo ĉiam okupis mian koron pro miaj amikoj en la Provinco, sed restis al mi iom da espero. Mi esperis, ke Frodo tuj ekvojaĝis, laŭ urĝo de mia letero, kaj ke li alvenis Rivendelon, antaŭ ol komenciĝis la mortiga persekuto. Kaj mia timo kaj mia espero ambaŭ pruviĝis senbazaj. Ĉar mia espero baziĝis sur grasulo en Brio, kaj mia timo baziĝis sur la ruzemo de Saŭrono. Sed grasuloj, kiuj vendas bieron, estas pri multaj aferoj alvokataj; kaj la potenco de Saŭrono estas ankoraŭ malpli forta ol ĝin supozigas timo. Sed en la cirklo de Isengardo, ne estis facile supozi, kaptite kaj izole, ke la persekutantoj, antaŭ kiuj fuĝis aŭ falis ĉiuj, malsukcesus en la fora Provinco.

— Mi vidis vin! — kriis Frodo. — Vi marŝis tien kaj reen. La luno rebrilis sur viaj haroj.

Gandalfo paŭzis mirigite kaj rigardis lin.

— Tio estis nur sonĝo, — diris Frodo, — sed ĝi subite revenis al mi. Mi

estis tute ĝin forgesinta. Tio estis antaŭ kelka tempo, post kiam mi forlasis la Provincon, ŝajnas al mi.

— Do, ĝi venis malfrue, — diris Gandalfo, — kiel vi konstatos. Mi estis en situacio malbonega. Kaj tiuj, kiuj konas min, konsentos, ke malofte mi troviĝis en simila malavantaĝo, kaj ne suferas pacience tian misfortunon. Gandalfo la Griza kaptita kiel muŝo en trompa araneaĵo! Tamen eĉ la plej subtilaj araneoj povas lasi fadenon malfortan.

» Unue mi timis, kiel sendube Sarumano intencis, ke ankaŭ Radagasto malvirtiĝis. Tamen, mi rimarkis neniun indikon pri io misa en lia voĉo aŭ en liaj okuloj, kiam ni renkontiĝis. Se jes, mi neniam estus irinta al Isengardo, aŭ mi irus pli singarde. Tion Sarumano antaŭvidis, kaj li kaŝis sian menson kaj trompis sian kurieron. Estis ĉiuokaze senutile, provi forlogi al perfido la honestan Radagaston. Li serĉis min bonfide, kaj tial persvadis min.

» Tio malsukcesigis la komploton de Sarumano. Ĉar Radagasto vidis neniun motivon ne fari laŭ mia peto, kaj li forrajdis al Mornarbaro, kie li havis multajn amikojn el la malnova tempo. Kaj la Montaj Agloj iris foren kaj vasten, kaj ili vidis multajn aferojn: la kunigadon de lupoj kaj vicigadon de orkoj; kaj la Naŭ Rajdantojn irantajn ien-tien en la landoj; kaj ili aŭdis novaĵojn pri la eskapo de Golumo. Kaj ili sendis kurieron por alporti al mi tiujn sciigojn.

» Tiel okazis, ke kiam velkis la somero venis lunluma nokto, kaj Gvajhiro la Ventmastro, plej rapida el la Grandaj Agloj, venis neatendite al Ortanko; kaj li trovis min staranta sur la turpinto. Tiam li alparolis min, kaj li forportis min, antaŭ ol Sarumano konsciis pri tio. Mi estis malproksima de Isengardo, antaŭ ol lupoj kaj orkoj eliris tra la pordo por min persekuti.

» “Kiomdistance vi povos porti min?” — mi diris al Gvajhiro.

» “Multajn mejlojn, — li diris, — sed ne ĝis la randoj de la tero. Oni sendis min porti sciigojn, ne ŝarĝojn”.

» “Do surtere mi devas havi ĉevalon, — mi diris, — kaj ĉevalon elstare rapidan, ĉar neniam antaŭe necesis al mi tiom da rapideco”.

» “Do mi portos vin ĝis Edoraso, kie la reĝo de Rohano sidas en sia halo, — li diris; — ĉar tio ne malproksimas”. Kaj mi ĝojis, ĉar en la Markio Rohano loĝas la rohananoj, la ĉeval-mastroj, kaj neniuj ĉevaloj superas tiujn, kiuj estas bredataj en tiu granda valo inter la Nebulecaj Montoj kaj la Blankaj.

» “Ĉu vi supozas, ke la homoj de Rohano estas ankoraŭ fidindaj?” mi demandis Gvajhiron, ĉar Sarumano ŝancelis mian fidon.

» “Ili pagas tributon da ĉevaloj, — li respondis, — kaj sendas multajn ĉiujare al Mordoro, aŭ tion oni diras; sed ili ankoraŭ ne estas sub la jugo. Sed se Sarumano malvirtiĝis, kiel vi asertas, tiuokaze ilia sorto ne povas esti

longe prokrastata”.

» Li demetis min antaŭ la aŭroro en Rohano; sed jam mi trolongigis mian rakonton. La cetero devas esti pli mallonga. En Rohano mi trovis la mison de la mensogoj de Sarumano; kaj la reĝo de la lando ne volis aŭskulti miajn avertojn. Li ordonis, ke mi prenu ĉevalon kaj foriru; kaj mi elektis ĉevalon, kiu multe kontentigis min, sed ne lin. Mi prenis la plej bonan ĉevalon en lia lando, kaj similan mi neniam vidis.

— Do ĝi nepre estas besto nobla, — diris Aragorno, — kaj tre malĝojigas min pli, ol multaj novaĵoj ŝajne pli malbonaj, ekscii, ke Saŭrono postulas tian tributon. Ne estis tiel, kiam mi lastfoje vizitis tiun landon.

— Ankaŭ ne nun, mi pretas ĵuri, — diris Boromiro. — Tio estas mensogo de la Malamiko. Mi konas la homojn de Rohano, bravajn kaj kuraĝajn, niajn aliancanojn, loĝantajn ankoraŭ sur la teroj, kiujn ni donis al ili antaŭlonge.

— La ombro de Mordoro surkuŝas malproksimajn landojn, — respondis Aragorno. — Sarumanon ĝi influis. Rohano estas sieĝata. Kiu scias, kion vi trovos tie, se iam vi reiros?

— Almenaŭ ne tion, — diris Boromiro, — ke ili pretas elaĉeti siajn vivojn pere de ĉevaloj. Siajn ĉevalojn ili amas, preskaŭ kiel siajn parencojn. Kaj ne senkaŭze, ĉar la ĉevaloj de Markio devenas de l’ kampoj de la Nordo, malproksime de l’ Ombro, kaj ilia raso, kiel tiu de iliaj mastroj, estas posteuloj de la liberaj tagoj de l’ pratempo.

— Ja vere! — diris Gandalfo. — Kaj troviĝis inter ili unu, kiu povis esti naskita dum la mateno de la mondo. La ĉevaloj de la Naŭ ne povas konkurenci kun li; senlaca, rapida kiel la fluanta vento. Ombrofakso oni nomas lin. Tage lia haŭto rebrilas arĝentece; kaj nokte li similas ombron, kaj li pasas nevidate. Malpezaj estas liaj hufbatoj! Neniam antaŭe oni sursidis lin, sed mi prenis kaj malsovaĝigis lin, kaj tiom rapide li portis min, ke mi alvenis la Provincon, kiam Frodo estis sur la dolmenaj montetoj, kvankam mi ekiris de Rohano ĝuste kiam li ekiris de Hobiturbo.

» Sed timo pligrandiĝis en mi dum la rajdado. Ĉiam dum mi venis norden mi aŭdis novaĵojn pri la Rajdantoj, kaj kvankam mi pliproksimiĝis al ili tagon post tago, ili ĉiam antaŭis min. Mi eksciis, ke ili disduigis siajn fortojn: iuj restis ĉe la orientaj bordoj, ne malproksime de la Verdvojo, kaj iuj invadis, la Provincon desude. Mi atingis Hobiturbon kaj Frodo jara foriris, sed mi parolis kun maljuna Vato. Multa vortpafo, malmulte da trafo. Li multe volis paroli pri la malperfektaĵoj de l’ novaj posedantoj de Bag-Endo.

» “Mi ne toleras ŝanĝojn, — li diris, — ne je mia aĝo, kaj ĉefe ŝanĝojn al malplibono. Ŝanĝoj al malplibono”, — li ripetis multfoje.

» “Malplibono estas vorto misa, — mi diris al li, — kaj espereble vi ne ĝisvivos sperton pri ĝi”. Sed el lia parolado mi fine kompreittis, ke Frodo forlasis Hobiturbon antaŭ malpli ol semajno, kaj ke Nigra Rajdanto venis al la Monteto tiun saman vesperon. Poste mi plurajdis timoplene. Mi alvenis Boklandon kaj trovis ĝin perturbita, tiel aktiva kiel formikejo, kiun oni kirlis per bastono. Mi venis ĝis la domo ĉe Stretkavo, kaj ĝi estis rompmalfermita kaj malplena; sur la sojlo kuŝis mantelo de Frodo. Poste dum iom da tempo espero forlasis min, kaj mi ne atendis por akiri novaĵojn, aŭ mi eble konsoliĝus; sed mi rajde sekvis la spuron de la Rajdantoj. Ĝi estis malfacile sekvebla, ĉar ili iris multdirekten, kaj mi ne sciis kien. Sed ŝajnis al mi, ke unu-du iris al Brio; kaj tiun vojon mi iris, ĉar mi pensis pri vortoj eble dirotaj al la tavernisto.

» “Buterburo oni nomas lin, — pensis mi. — Se li kulpas tiun ĉi prokraston, mi fandos lian tutan buteron. Mi rostos la maljunan stultulon sur malarda fajro”. Nenion alian li atendis, kaj kiam li vidis mian vizaĝon li surteren platigis sin kaj tuj komencis fandiĝi.

— Kion vi faris al li? — kriis Frodo alarmite. — Li vere traktis nin tre bonkore kaj faris ĉion eblan.

Gandalfo ridis.

— Ne timu! — li diris. — Mi ne mordis, kaj tre malmulte bojis. Tiel superĝojigita mi estas pro la informoj, kiujn mi eligis el li, kiam li ĉesis tremi, ke mi brakumis tiun maljunulon. Kiel tio okazis, mi tiam ne povis diveni, sed mi eksciis, ke vi estis en Brio la antaŭan nokton, kaj foriris tiumatene kun Paŝegulo.

» “Ĉu Paŝegulo?” — mi kriis, laŭte pro ĝojo.

» “Jes, sinjoro, mi timas, ke jes, sinjoro, — diris Buterburo, miskompreninte. — Li atingis ilin, malgraŭ ĉiuj miaj klopodoj, kaj ili kuniĝis al li. Ili kondutis tre strange la tutan tempon de sia ĉeesto: obstine, oni povus diri”.

» “Azeno! Stultulo! Trioble valora kaj amata Barlimano! — mi diris. — Jen la plej bela novaĵo, kiun mi ricevis depost la somermezo: ĝi valoras oran moneron minimume. Via biero estu sorĉita je elstara bonegeco dum sep jaroj! Nun mi povas permesi al mi ununoktan ripozon, la unuan fojon de kiam mi ne memoras”.

» Do mi tranoktis tie, multe scivolante, kio okazis pri la Rajdantoj; ĉar nur pri du el ili ĝis tiam estis informoj en Brio, verŝajne. Sed dum la nokto mi aŭdis pli. Almenaŭ kvin venis el la okcidento, faligis la urbopordojn kaj trapasis Brion, kvazaŭ hurlanta vento; kaj ĝis nun la brianoj tremadas kaj atendas la finon de l’ mondo. Mi leviĝis antaŭ la aŭroro kaj postsekvis ilin.

» Mi ne scias, sed ŝajnas al mi klare, ke okazis tiel ĉi. Ilia Estro sekrete

restis fore, sude de Brio, dum du rajdis antaŭen tra la vilaĝo, kaj kvar aliaj invadis la Provincon. Sed kiam tiuj malsukcesis en Brio kaj en Stretkavo, ili revenis al sia Estro kun la informoj, kaj tial provizore lasis sengarda la Vojon, escepte de siaj spionoj. La Estro tiam sendis kelkajn orienten, rekte trans la terenon, kaj li mem kun la cetero rajdis kolerege laŭ la Vojo.

» Mi galopis ĝis Veterverto kvazaŭ ŝtormego, kaj mi atingis ĝin antaŭ la sunsubiro de l' dua tago post Brio — kaj ili jam antaŭis min. Ili distancigis sin de mi, ĉar ili sentis la alvenon de mia kolero, kaj ili ne aŭdacis fronti min dum la Suno ankoraŭ surĉielis. Sed nokte ili ĉirkaŭis min, kaj mi estis sieĝata sur la pinto, en la malnova ringo de Amono Sulo. Mi vere havis malfacilaĵojn: tiom da lumo kaj flamado certe ne estis vidata supre de Veterverto depost la pratempaj militaj avertofajroj.

» Je sunleviĝo mi eskapis kaj fuĝis norden. Mi ne povis esperi pri pli. Estis neeble trovi vin, Frodo, en la sovaĝejo, kaj estus idiote provi kun la Naŭ en proksima persekuto. Do mi devis fidi pri Aragorno. Sed mi esperis deviigi kelkajn el ili, kaj tamen atingi Rivendelon antaŭ vi kaj elsendi helpon. Kvar Rajdantoj efektive sekvis min, sed ili retroiris post iom da tempo kaj celis la Transpasejon, verŝajne. Tio helpis iomete, ĉar ĉeestis nur kvin, ne naŭ, kiam via noktumejo estis atakata.

» Mi finfine alvenis ĉi tien laŭ longa malfacila vojo, supren laŭ la Prujnelo kaj tra la Etenerikejoj, kaj malsupren el la nordo. Mi bezonis preskaŭ dek kvar tagojn ekde Veterverto, ĉar mi ne povis rajdi inter la rokoj de la trol-montetoj, kaj Ombrofakso foriris. Mi resendis lin al lia mastro; sed forta amikeco estis kreiĝinta inter ni, kaj se mi lin bezonos, li alvenos je mia alvoko. Sed tiel estis, ke mi venis al Rivendelo nur tri tagojn antaŭ la Ringo, kaj sciigo pri ties danĝero jam estis alportita ĉi tien — kio pruviĝis efektive avantaĝa.

» Ĉi tie, Frodo, finiĝas mia rakonto. Elrondo kaj la aliaj pardonu ĝian longecon. Sed neniam antaŭe okazis, ke Gandalfo ne plenumis renkontiĝ-aranĝon kaj ne alvenis laŭpromese. Raporto al la Ringoportanto pri tiom stranga okazaĵo estis necesa, laŭ mi.

» Nu, la Historio estas nun rakontita, de komenco ĝis fino. Jen estas ni ĉiuj, kaj jen estas la Ringo. Sed ni ankoraŭ ne pliproksimiĝis al nia celo. Kion ni faru pri ĝi?

Sekvis silento. Finfine Elrondo ekparolis denove.

— Tio estas doloriga novaĵo pri Sarumano, — li diris, — ĉar ni fidis lin kaj li profundiĝis en ĉiujn niajn konsiliĝojn. Estas danĝere studi tro profunde la artojn de l' Malamiko, ĉu boncele aŭ miscele. Sed liaj malvirtiĝoj kaj perfidoj, ho ve, okazis ankaŭ pli frue. El la rakontoj, kiujn ni aŭdis ĉi-tage, tiu de Frodo estis por mi la plej stranga. Malmultajn hobitojn

mi konis, krom Bilbo, kaj ŝajnas al mi, ke li eble ne estas tiom sola kaj unuopa, kiom mi supozis lin. La mondo multe ŝanĝiĝis, de kiam mi lastfoje laŭiris la okcidentajn vojojn.

» La dolmenulojn ni konas laŭ multaj nomoj, kaj pri la Malnova Arbaro multaj historioj estas rakontitaj: tio, kio nun restas, estas nur ekstremaĵo de ĝia norda limo. Iam sciuro povis iri de arbo ĝis arbo, de tio, kio nun estas la Provinco, ĝis Dunlando okcidente de Isengardo. Tra tiuj landoj mi foje vojaĝis, kaj multajn aferojn sovaĝajn kaj strangajn mi konis. Sed mi forgesis pri Bombadiljo, se efektive li estas tiu sama, kiu laŭmarŝis la arbaron kaj montetojn antaŭlonge, kaj eĉ tiam estis pli maljuna ol la plej maljunaj. Tiam li nomiĝis ne tiel. Iarven Ben-Adar ni nomis lin, plejoldan kaj senpatran. Sed multajn aliajn nomojn li ricevis post tiam de aliuloj: Forno laŭ la gnomoj, Oraldo laŭ la norduloj, kaj krome aliajn nomojn. Li estas strangulo, sed eble mi devis lin alvoki al nia Konsiliĝo.

— Li ne konsentus veni, — diris Gandalfo.

— Ĉu ni tamen ne povus sendi al li mesaĝojn kaj ricevi lian helpon? — demandis Erestoro. — Ŝajnas, ke li potence superas eĉ la Ringon.

— Ne, tiel mi ne esprimus la aferon, — diris Gandalfo. — Prefere diru, ke la Ringo ne potence superas lin. Li mastras sin mem. Sed li ne kapablas ŝanĝi la Ringon, nek rompi ĝian potencon super aliaj. Kaj nun li retiriĝis en etan terenon, inter limoj, kiujn li mem difinis, kvankam neniu povas vidi ilin, eble atendas ŝanĝiĝon de la tagoj, kaj tiujn limojn li ne preterpasos.

— Sed interne de tiuj limoj, nenio ŝajne lin perturbas, — diris Erestoro. — Ĉu li ne akceptus la Ringon por konservi ĝin tie, eterne senpotencan?

— Ne, — diris Gandalfo, — ne volonte. Li eble tion farus, se ĉiuj liberaj popoloj de la mondo tion petegus, sed la neceson li ne komprenus. Kaj se oni donus al li la Ringon, li baldaŭ forgesus pri ĝi, aŭ plej probable ĝin forĵetus. Tiaj aferoj ne kroĉiĝas al lia menso. Li estus gardanto tre malsekura, kaj tio mem estas sufiĉa respondo.

— Sed ĉiuokaze, — diris Glorfindelo, — sendi al li la Ringon nur prokrastus la tagon de malbono. Li estas tre malproksima. Ni ne povus nun reporti ĝin al li, nedivenite, nerimarkite de iu spiono. Kaj eĉ se ni povus, pli aŭ malpli frue la Mastro de l' Ringoj ekscius pri ĝia kaŝejo kaj direktus sian tutan potencon al ĝi. Ĉu tiun potencon povus Bombadiljo sola spiti? Al mi ŝajnas, ke ne. Al mi ŝajnas, ke finfine, se ĉio alia estos venkita, Bombadiljo venkiĝos la Lasta kiel li estis la Unua, kaj poste venos Nokto.

— Mi scias malmulte pri Iarveno krom la nomo, — diris Gandalfo, — sed Glorfindelo pravas, laŭ mia opinio. Potencon spiti nian Malamikon li ne posedas, krom se tia potenco troviĝas en la tero mem. Kaj tamen ni vidas, ke Saŭrono kapablas turmenti kaj detrui eĉ montetojn. La restanta

potenco troviĝas ĉe ni, ĉi tie en Imladriso, aŭ ĉe Cirdano ĉe la Havenoj, aŭ en Lorieno. Sed ĉu ili havas sufiĉan forton, ĉu ni ĉi tie havas sufiĉan forton por kontraŭstari la Malamikon, la alvenon de Saŭrono en la fino, kiam ĉio cetera estos renversita?

— Mi ne havas sufiĉan forton, — diris Elrondo; — ankaŭ ili ne havas.

— Do se oni ne povas forteni de li la Ringon per forto, — diris Glorfindelo, — restas nur du eblecoj por niaj klopodoj: ĝin forsendi trans la Maron, aŭ ĝin detrui.

— Sed Gandalfo vidigis al ni, ke ni ne kapablas detrui ĝin per iu ajn rimedo, kiun ni posedas ĉi tie, — diris Elrondo. — Kaj tiuj, kiuj loĝas trans la Maro rifuzus ricevi ĝin: ĉu bone aŭ malbone, ĝi apartenas al Mez-Tero; ni, kiuj loĝas ĉi tie, devas pritrakti ĝin.

— Tiuokaze, — diris Glorfindelo, — ni ĵetu ĝin en la profundejojn, kaj tiel verigi la mensogojn de Sarumano, ĉar estas jam klare, ke eĉ ĉe la Konsiliĝo li jam paŝis serpentuman vojon. Li sciis, ke la Ringo ne estas por ĉiam perdita, sed li volis, ke ni tion supozu; ĉar li komencis avidi ĝin por si. Tamen ofte en mensogoj kaŝiĝas vero: en la maro ĝi estus sendanĝera.

— Ne por ĉiam sendanĝera, — diris Gandalfo. — En la profundaj akvoj troviĝas multaj aferoj; kaj maroj kaj teroj eble ŝanĝiĝos. Kaj ne estas nia rolo ĉi tie pripensi nur provizoron, aŭ kelkajn vivdaŭrojn de homoj, aŭ paseman epokon de l' mondo. Ni devus serĉi finsolvon de tiu ĉi minaco, eĉ se ni ne esperas tion krei.

— Kaj tion ni ne trovos sur la vojoj al la Maro, — diris Galdoro. — Se la redono al Iarveno supoziĝos tro danĝera, do fuĝo al la Maro estas plenplena je plej serioza danĝero. Mia koro sciigas al mi, ke Saŭrono atendos, ke ni ekiru okcidenten, kiam li informiĝos pri tio, kio okazis. Tio baldaŭ estos. La Naŭ ja estas senĉevaligitaj, sed tio estas nur paŭzo, antaŭ ol ili trovos novajn rajdbestojn pli rapidajn. Nur la velka potenco de Gondoro jam staras inter li kaj marŝado plenpotenca laŭ la marbordoj Norden; kaj se li venos, atakante la blankajn turojn kaj la Havenojn, la elfoj eble ne havos eskapeblecon el la plilongiĝantaj ombroj de Mez-Tero.

— Ankoraŭ longe tiu marŝado estos prokrastata, — diris Boromiro. — Gondoro velkas, vi diras. Sed Gondoro staras, kaj eĉ la fino de ĝia forto tamen tre fortas.

— Kaj tamen ĝia atentemo ne plu povas reteni la Naŭon, — diris Galdoro. — Kaj eble aliajn vojojn li trovos, kiujn Gondoro ne gardas.

— Sekve, — diris Erestoro, — ekzistas nur du eblecoj por niaj klopodoj, kiel Glorfindelo jam deklaris: kaŝi la Ringon por ĉiam, aŭ malfari ĝin. Sed ambaŭ estas ekster nia potenco. Kiu solvos por ni tiun ĉi enigmon?

— Neniu ĉi tie kapablas, — diris Elrondo seriozmiene. — Almenaŭ

neniu kapablas antaŭdiri, kio okazos, se ni sekvos tiun aŭ alian vojon. Sed ŝajnas al mi jam klare, kiu estu la sekvota vojo. La vojo okcidenten ŝajnas plej facila. Sekve ĝi estas evitenda. Oni gardos ĝin. Tro ofte la elfoj fuĝis laŭ tiu vojo. Nun finfine ni devas sekvi vojon malfacilan, vojon neantaŭviditan. Tie troviĝas nia espero, se espero ĝi ja estas. Marŝi en danĝeron — ĝis Mordoro. Ni devas sendi la Ringon al la Fajro.

Denove ekregis silento. Frodo, eĉ en tiu bela domo, frontante sunluman valon plenan je la bruo de klaraj akvoj, sentis mortigan mallumon en sia koro. Boromiro ekmoviĝis, kaj Frodo rigardis lin. Li fingrumis sian grandan kornon kaj brovumis. Fine li ekparolis.

— Mi ne komprenas ĉion ĉi, — li diris. — Sarumano estas perfidulo, sed ĉu li ne ekvidis iom da saĝo? Kial vi ĉiam parolas pri kaŝado kaj detruado? Kial ni ne supozu, ke la Granda Ringo venis en niajn manojn por servi al ni en la horo de nia bezono? Uzante ĝin, la Liberaj Mastroj de l' Liberuloj certe povos venki la Malamikon. Tion li plej timas, laŭ mia opinio.

» La homoj de Gondoro estas kuraĝaj, kaj ili neniam submetiĝos, sed ili eble estos subenbatitaj. Kuraĝo bezonas unue forton, kaj poste armilon. La Ringo estas via armilo, se ĝi posedas tiom da potenco, kiom vi asertas. Prenu ĝin kaj eliru al la venko!

— Ho ve, neniel, — diris Elrondo. — Ni ne povas uzi la Regantan Ringon. Tion ni jam tro bone scias. Ĝi apartenas al Saŭrono, ĝi estas farita sole de li kaj estas tute fia. Ĝia forto, Boromiro, estas tro granda por ke iu laŭvole uzu ĝin, escepte nur tiuj, kiuj jam havas grandan forton propran. Sed por tiuj ĝi enhavas minacon eĉ pli teruran, Mem la deziro pri tio koruptas la koron. Pripensu Sarumanon. Se iu el la Saĝaj per tiu ĉi Ringo renversus la Mastron de Mordoro, uzante proprajn spertojn, tiu sidiĝus tiam mem sur la trono de Saŭrono, kaj aperus alia Malluma Mastro. Kaj tio estas alia motivo por detrui la Ringon: dum ĝi troviĝas en la mondo, ĝi estas danĝera eĉ al la Saĝaj, ĉar nenio estas malbona en la komenco. Eĉ Saŭrono ne estis tia. Mi timas preni la Ringon por ĝin kaŝi. Mi rifuzas preni la Ringon por ĝin uzi.

— Ankaŭ mi, — diris Gandalfo.

Boromiro rigardis ilin dubeme, sed li klinis sian kapon.

— Tiel estu, — li diris. — Sekve en Gondoro ni devos fidi al tiuj armiloj, kiujn ni havas. Kaj minimume, dum la Saĝaj gardas tiun Ringon, ni daŭrigos la bataladon. Povas esti, ke la Glavo-kiu-estis-Rompita tamen haltigos la tajdon — se la mano, kiu uzas ĝin, heredis ne nur la familian trezoron, sed ankaŭ la muskolojn de l' Reĝoj de la homoj.

— Kiu povas scii? — diris Aragorno. — Sed iutage ni provos tion.

— Tiu tago ne estu tro longe prokrastita, — diris Boromiro. — Ĉar

kvankam mi ne petas helpon, ĝin ni bezonas. Estus al ni konsole scii, ke ankaŭ aliaj batalas per ĉiuj rimedoj je sia dispono.

— Do havu konsolon, — diris Elrondo. — Ĉar ekzistas aliaj potencoj kaj regnoj, kiujn vi ne konas, kaj ili estas kaŝitaj antaŭ vi. Anduino la Granda preterfluas multajn bordojn, antaŭ ol ĝi venas al Argonado kaj la Pordoj de Gondoro.

— Tamen eble profitus ĉiuj, — diris la gnomo Gloino, — se ĉiuj tiuj fortoj estus kunigitaj, kaj la potencoj de ĉiuj estus uzataj komune. Eble estas aliaj ringoj, malpli perfidemaj, kiuj povus esti uzataj por nia bezono. Perdiĝis al ni la Sep — se Balino ne trovis la ringon de Troro, kiu estis la lasta; nenion oni aŭdis pri ĝi post kiam Troro pereis en Morio. Fakte mi nun povas sciigi, ke parte pro espero trovi tiun ringon Balino foriris.

— Balino trovos neniun ringon en Morio, — diris Gandalfo. — Troro donis ĝin al sia filo Traino, sed Traino ne pludonis ĝin al Torino. Ĝi estis forprenita per turmentoj de Traino en la ĉeloj de Dol Gulduro. Mi alvenis tro malfrue.

— Ha, ve! — kriis Gloino. — Kiam alvenos la tago de nia venĝo? Sed restas ankoraŭ la Tri. Kio pri la Tri Ringoj de la elfoj? Tre potencaj Ringoj, oni diras. Ĉu ne la elfaj mastroj tenas ilin? Tamen ankaŭ ili estas kreitaj antaŭ longe de la Malluma Mastro. Ĉu ili nenion faradas? Mi vidas ĉi tie elfajn mastrojn. Ĉu ili ne volas diri?

La elfoj redonis neniun respondon.

— Ĉu vi min ne aŭdis, Gloino? — diris Elrondo. — La Trion faris ne Saŭrono, kiu neniam eĉ tuŝis ilin. Sed pri ili estas malpermesite paroli. Nur tiom en tiu ĉi horo de dubo mi rajtas diri. Ili ne nenion faradas. Sed ili ne estis kreitaj kiel armiloj de milito aŭ konkerado: tia ne estas ilia potenco. Tiuj, kiuj kreis ilin, ne deziris forton, dominadon aŭ amasigitan riĉaĵon, sed komprenon, kreadon kaj kuracadon, por konservi ĉion senmakula. Tiujn aferojn la elfoj de Mez-Tero certagrade akiris, kvankam kun malĝojo. Sed ĉio farita de tiuj, kiuj uzas la Trion, iĝos malutila al ili, kaj iliaj mensoj kaj koroj riveliĝos al Saŭrono, se li regajnos la Unun. Estus prefere, ke la Tri neniam estus ekzistintaj. Tio estas lia celo.

— Sed kio do okazus, se la Reganta Ringo estus detruita, kiel vi konsilas? — demandis Gloino.

— Mi ne scias certe, — respondis Elrondo malĝoje. — Iuj esperas, ke la Tri Ringoj, kiujn Saŭrono neniam tuŝis, tiam liberiĝus, kaj iliaj regantoj eble kuracus la vundojn de la mondo, kiun li kreis. Sed eble kiam la Unu estos for, la Tri velkos, kaj multaj belaj aferoj velkos kaj estos forgesitaj. Tio estas mia opinio.

— Tamen ĉiuj elfoj pretas riski tiun hazardon, — diris Glorfindelo,

— se per tio povos esti rompita la potenco de Saŭrono, kaj la timo pri lia regado povos esti forigita por ĉiam.

— Tiel ni revenas al detruado de la Ringo, — diris Erestoro, — kaj tamen ne pli proksimiĝas. Kian forton ni posedas por trovi la Fajron, en kiu ĝi estis farita? Tio estas vojo de la malespero. De malsaĝo, mi volus diri, se la daŭra saĝo de Elrondo ne malebligus tion.

— Ĉu malespero, aŭ malsaĝo? — diris Gandalfo. — Ne temas pri malespero, ĉar malesperas nur tiuj, kiuj vidas la finon sen ia ajn dubo. Tion ne faras ni. Estas saĝe rekoni neceson, kiam ĉiuj aliaj agebloj estas pesitaj, kvankam povas ŝajni malsaĝe al tiuj, kiuj kroĉiĝas al falsa espero. Nu, malsaĝo estu nia mantelo, vualo antaŭ la okuloj de l' Malamiko! Ĉar li estas tre saĝa, kaj pesas ĉion tre ekzakte per la pesilo de sia malico. Sed lia sola mezurilo estas la deziro, deziro por potenco, kaj tiel li taksas ĉiujn korojn. En lian koron ne eniros la koncepto, ke iu ajn rifuzos ĝin, ke tiu, kiu havas la Ringon, eble klopodos detrui ĝin. Se ni tion klopodos, ni trompos lin.

— Almenaŭ provizore, — diris Elrondo. — Tiun vojon oni devas paŝi, sed ĝi estos tre malfacila. Kaj nek forto nek saĝo portos nin tre foren sur ĝi. Tiun ĉi celon povos plenumi malfortuloj same esperplene kiel la fortaj. Tamen tia ofte estas la sinsekvo de agoj, kiuj turnas la radojn de la mondo: etaj manoj plenumas ilin pro tio, ke ili devas, dum la okuloj de l' eminentuloj rigardas aliloken.

— Nu bone, tre bone, Mastro Elrondo! — diris Bilbo subite. — Nenion diru pli! Sufiĉe klaras tio, kion vi indikas. La stulta hobito Bilbo komencis la aferon, kaj Bilbo prefere finu ĝin, aŭ sin mem. Mi vivis tre komforte ĉi tie, kaj mia libro progresis. Se vi volas scii, mi ĝuste verkas finon al ĝi. Mi pensis skribi: *kaj li vivis feliĉe ĉiam poste ĝis la fino de siaj tagoj*. Tio estas bona fino, kaj ne malpli valora pro tio, ke oni pli frue uzis ĝin. Jam mi devos ŝanĝi tion: verŝajne ĝi ne realiĝos, kaj ĉiuokaze evidentiĝas, ke pluraj pliaj ĉapitroj estos necesaj, se mi travivos por verki ilin. Estas treege ĝene. Kiam mi devos ekiri?

Boromiro rigardis surprizite Bilbon, sed lia ridemo formortis, kiam li rimarkis, ke ĉiuj aliaj rigardas la maljunan hobiton kun serioza respekto. Nur Gloino ridetis, sed lia rideto devenis de malnovaj memoroj.

— Kompreneble, mia kara Bilbo, — diris Gandalfo. — Se vi efektive komencus tiun ĉi aferon, oni eble rajtus atendi, ke vi finu ĝin. Sed vi jam scias sufiĉe bone, ke *komencado* estas tro granda pretendo por iu ajn, kaj ke nur malgrandan rolon ludas en grandiozaj faroj iu ajn heroo. Ne necesas riverenci! Kvankam la vortoj estis intencaj, kaj ni ne dubas, ke subspritaĵe vi starigas bravan proponon. Sed proponon preter via kapablo, Bilbo. Vi ne povas repreni tiun ĉi aĵon. Ĝi pluiris. Se vi ankoraŭ bezonas mian konsilon,

mi respondas, ke miaopinie finiĝis via rolo, krom eble kiel kronikisto. Finu vian libron, kaj lasu senŝanĝa la finon! Restas espero pri ĝi. Sed pretiĝu verki sekvaĵon, kiam ili revenos.

Bilbo ridis.

— Mi neniam antaŭe spertis, ke vi donas al mi konsilon agrablan, — li diris. — Ĉar la tuto de via konsilo malagrabla estis trafa, mi scivolas, ĉu tiu konsilo ne estas maltrafa. Tamen, supozeble mi ne plu havas sufiĉan forton aŭ bonŝancon por pritrakti la Ringon. Ĝi kreskis, kaj mi ne. Sed diru al mi: kion signifas *ili*?

— La kurieroj, kiuj estas sendotaj kun la Ringo.

— Ĝuste! Kaj kiuj ili estos? Tio ŝajnas al mi la decidotaĵo de tiu ci Konsiliĝo, kaj la tuto de ĝia decidotaĵo. Eble elfoj floras per parolado sole, kaj gnomoj toleras grandan laciĝon; sed mi estas nur maljuna hobito, kaj mankas al mi mia manĝo je tagmezo. Ĉu vi ne povas jam pensi pri kelkaj nomoj? Aŭ prokrasti ĝis post la tagmanĝo?

Neniu respondis. Tintis la tagmeza sonorilo. Ankoraŭ neniu parolis. Frodo ekrigardis ĉiujn vizaĝojn, sed ili ne turniĝis al li. La tuta Konsilio sidis kun subenturnitaj okuloj, kvazaŭ profunde pensante. Granda timo okupis lin, kvazaŭ li atendus verdikton de iu sorto, kiun li longe antaŭvidis kaj vane esperis neelflarolota. Superreganta sopiro ripozi kaj resti trankvile kun Bilbo en Rivendelo plenigis lian koron. Fine li pene ekparolis, kaj miris aŭdante siajn vortojn, kvazaŭ iu alia uzus lian etan voĉon.

— Mi prenos la Ringon, — li diris, — kvankam mi ne scias la vojon.

Elrondo levis siajn okulojn kaj rigardis lin, kaj Frodo sentis sian koron trapikita per la subita akreco de l' rigardo.

— Se mi bone komprenis ĉion, kion mi aŭdis, — li diris, — al mi ŝajnas, ke tiu ĉi tasko estas destinita al vi, Frodo; kaj ke se vi ne trovos vojon, neniu trovos. Tio ĉi estas la horo de l' provincanoj, kiam ili leviĝos el siaj kvietaj kampoj por skui la turojn kaj konsiliojn de l' potencaj. Kiu el la Saĝaj povus tion antaŭvidi? Aŭ, se ili estas saĝaj, kial ili atendu tion scii, antaŭ ol la horo sonoriĝis?

» Sed ĝi estas ŝarĝo peza. Tiel peza, ke neniu rajtus surmeti ĝin al alia. Mi ne surmetas ĝin al vi. Sed se vi akceptas ĝin volonte, mi volas diri, ke via elekto pravas. Eĉ se ĉiuj grandaj elf-amikoj de pratempo estus kuniĝintaj, Hadoro, Hurino kaj Turino, kaj mem Bereno, via sidloko estus inter ili.

— Sed vi certe ne forsendos lin sola, Mastro? — kriis Sam, nekapabla regi sin plu, kaj saltante el la angulo, kie li diskrete sidis sur la planko.

— Tute ne! — diris Elrondo, sin turnante al li kun rideto. — Almenaŭ vi akompanos lin. Estas preskaŭ neeble disigi lin de vi, eĉ kiam li estas

alvokita al kunsido sekreta kaj vi ne estas.

Sam residiĝis, ruĝiĝinte kaj murmurante.

— Jen bela kaĉo en kiun ni profundiĝis, s-ro Frodo! — li diris, skuante sian kapon.

3

La Ringo iras suden

Pli poste en tiu tago la hobitoj starigis propran kunvenon en la ĉambro de Bilbo. Gaja kaj Grinĉjo indigniĝis, kiam ili aŭdis, ke Sam ŝteliris en la Konsiliĝon, kaj estis elektita kiel kunulo de Frodo.

— Estas tre maljuste, — diris Grinĉjo. — Anstataŭ elĵeti lin kaj kateni lin, Elrondo eĉ *profitigas* lin pro lia impertinento!

— Ĉu profitigas! — diris Frodo. — Mi ne povas imagi punon pli severan. Vi ne pripensas tion, kion vi diras: kondamnita partopreni tiun senesperan vojaĝon, tio estas profitiga? Hieraŭ mi revis, ke mia tasko estas finita, kaj mi povos resti ĉi tie, dum longa tempo, eble por ĉiam.

— Ne mirinde, — diris Gaja, — kaj mi ŝatus, ke vi povu. Sed ni envias al Sam, ne al vi. Se vi devos iri, tiam estos puno al ĉiu el ni, kiu estus postlasita, eĉ en Rivendelo. Ni kuniris longan vojon kun vi kaj spertis iom da danĝero. Ni deziras daŭrigi.

— Ĝuste tion ni celis, — diris Grinĉjo. — Ni, hobitoj, devus solidariĝi, kaj tion ni faros. Mi ja iros, krom se oni min katenos. Devas troviĝi iu inteligenta en la grupo.

— Tiuokaze vi certe ne estos elektita, Peregrino Tjuko! — diris Gandalfo, enrigardante tra la fenestro, kiu proksimis la teron. — Sed vi ĉiuj ĝeniĝas nenecese. Nenio estas ankoraŭ decidita.

— Nenio decidita! — kriis Grinĉjo. — Do kion vi ja faris? Vi estis enfermitaj dum horoj.

— Ni parolis, — diris Bilbo. — Aŭdiĝis multe da parolado, kaj ĉiuj spertis revelaciojn. Eĉ maljuna Gandalfo. Mi opinias, ke la novaĵeto de Legolaso pri Golumo ŝancelis eĉ lin, kvankam li ŝajnigis alie.

— Vi malpravas, — diris Gandalfo. — Vi malatentis. Mi jam aŭdis tion de Gvajhiro. Se vi volas scii, la solaj veraj revelacioj, kiel vi tion esprimis, estis vi kaj Frodo; kaj mi estis la sola, kiu ne surpriziĝis.

— Nu, ĉiuokaze, — diris Bilbo, — nenio estis decidita krom elekto de kompatinda Frodo kaj Sam. Mi timis la tutan tempon, ke tio okazus, se min oni indulgus. Sed laŭ mia opinio Elrondo elsendos sufiĉe multajn, kiam alvenos la raportoj. Ĉu ili jam komencis, Gandalfo?

— Jes, — diris la sorĉisto. — Iuj skoltoj estas jam elsenditaj. Morgaŭ ekiros aliaj. Elrondo sendas elfojn, kaj ili kontaktiĝos kun la disiruloj, kaj

eble kun la gento de Tranduilo en Mornarbaro. Kaj Aragorno iris kun la filoj de Elrondo. Ni devos esplori la terenojn ĉiudirekte multajn mejlojn antaŭ ol komenci iun moviĝon. Do ĝojiĝu, Frodo! Vi probable restos ĉi tie sufiĉe longe.

— Aĥ! — diris Sam malgaje. — Ni atendos ĝuste sufiĉe longe por alveno de la vintro.

— Tio estas neevitebla, — diris Bilbo. — Kulpas parte vi, Frodo mia knabo: ĉar vi insistis resti ĝis mia naskiĝdata festo. Stranga maniero honori ĝin, laŭ mia opinio. Ne *tiun* tagon mi elektus por enlasi la Retikul-Baginzojn en Bag-Endon. Sed jen la afero: vi ne povas nun atendi ĝis la printempo; kaj vi ne povos foriri ĝis revenos la raportoj.

Kiam la vintro ekatakas
kaj frostanokte ŝtonoj krakas,
dum nigras flakoj, arboj nudas,
miso en Sovaĝej' apudas.

Mi bedaŭras, sed tia estas via sorto.

— Mi timas, ke jes, — diris Gandalfo. — Ni ne povos komenci ĝis ni informiĝos pri la Rajdantoj.

— Mi supozis, ke ilin ĉiujn detruis la fluso, — diris Gaja.

— Oni ne povas tiel detrui Ringofantomojn, — diris Gandalfo. — La potenco de ilia mastro estas en ili, kaj ili staras aŭ pereas laŭ li. Ni esperas, ke ili ĉiuj estis senĉevaligitaj kaj senmaskigitaj, kaj tiel provizore faritaj malpli danĝeraj; sed ni devas ekscii certe. Dume vi devus laŭeble forgesi viajn zorgojn, Frodo. Mi ne scias, ĉu mi povas iel helpi vin, sed tion ĉi mi flustros al via orelo. Iu diris, ke inteligento estos bezonata en la grupo. Li pravis. Mi opinias, ke mi akompanos vin.

Tiom granda estis la ĝojo de Frodo pro tiu anonco, ke Gandalfo forlasis la fenestrobreton, sur kiu li sidis, demetis la ĉapelon kaj riverencis.

— Mi diris nur *Mi opinias, ke mi akompanos*. Ne kalkulu ankoraŭ pri io ajn. Pri tiu ĉi afero multon volos diri Elrondo kaj via amiko Paŝegulo. Tio memorigas min, ke mi volas renkonti Elrondon. Mi devas iri.

— Kiom da tempo laŭ via opinio mi disponos ĉi tie? — diris Frodo al Bilbo post la foriro de Gandalfo.

— Ho, mi ne scias. En Rivendelo mi ne kapablas kalkuli la tagojn, — diris Bilbo. — Sed sufiĉe, laŭ mia supozo. Ni povos ĝui multajn konversaciojn agrablajn. Ĉu vi emas helpi min pri mia libro kaj komenci la sekvontan? Ĉu vi elpensis bonan finon?

— Jes, plurajn, kaj ĉiuj malhelas kaj malagrablas, — diris Frodo.

— Ho, tio ne konvenas! — diris Bilbo. — Libroj devus havi finojn

agrablajn. Kiel plaĉas al vi: *kaj ili ĉiuj ĉesis vagadi kaj kunvivis feliĉe ĉiam poste*?

— Tio plaĉas sufiĉe, se iam okazos tiel, — diris Frodo.

— Ha! — diris Sam. — Kaj kie ili loĝos? Tion mi ofte scivolas.

Dum kelka tempo la hobitoj daŭrigis la paroladon kaj pensis pri la pasinta vojaĝo kaj la danĝeroj ankoraŭ antaŭ ili; sed tia estis la lando Rivendelo, ke baldaŭ la tutaj timo kaj antaŭzorgo estis levitaj de sur iliaj mensoj. La estonteco, ĉu bona ĉu misa, ne estis forgesita, sed ĉesis regi la eftantecon. Sano kaj espero fortiĝis en ili, kaj ili estis kontentaj pri ĉiu bona tago kiam ĝi alvenis, ĝuante ĉiun manĝon, ĉiujn vortojn kaj kantojn.

Tiel la tagoj forglisis, dum ĉiu mateno aŭroris hela kaj bela, kaj ĉiu vespero sekvis malvarmeta kaj klara. Sed la aŭtuno estis rapide velkanta; malrapide la ora lumo iĝis pale arĝenta, kaj la restantaj folioj falis de la nudaj arboj. Vento komencis blovi froste el la Nebulecaj Montoj oriente. La Luno de l' Ĉasisto kreske rondiĝis sur la ĉielo, kaj fuĝigis ĉiujn malpli gravajn stelojn. Sed malalte en la sudo ruĝis unu stelo. Ĉiunokte, dum la Luno malkreskis denove, ĝi brilis ĉiam pli hele. Frodo povis ĝin vidi tra sia fenestro, profunde sur la ĉielo; ĝi brulis kvazaŭ vaĉa okulo, kiu ardis super la arboj rande de la valo.

La hobitoj jam pasigis preskaŭ du monatojn en la Domo de Elrondo, kaj forpasis novembro kun la lastaj fragmentoj de l' aŭtuno, kaj decembro estis pasanta, kiam la skoltoj komencis reveni. Iuj iris norden preter la fontojn de Prujnelo en la Etenerikejoj; kaj aliaj iris okcidenten, kaj kun helpo de Aragorno kaj la disiruloj traserĉis la terenojn malproksime laŭ Grizinundo, ĝis Tarbado, kie la malnova Norda Vojo transiras la riveron apud ruiniĝinta urbo. Multaj iris orienten kaj suden; kaj kelkaj el tiuj transiris la Montojn kaj eniris Mornarbaron, dum aliaj grimpis la transirejon ĉe la fonto de l' Irida Rivero, kaj subeniris en Sovaĝejon kaj tra la Iridaj Kampoj kaj tiel finfine alvenis la malnovan hejmon de Radagasto en Rosgobelo. Radagasto ne ĉeestis, kaj ili revenis trans la altan pasejon, kiu nomiĝis la Dimrila Ŝtuparo. La filoj de Elrondo, Eladano kaj Elrohiro, revenis la lastaj; ili faris grandan vojaĝon, pasante laŭ la Arĝentvejno en fremda tereno, sed pri sia celo ili ne volis paroli krom al Elrondo.

En neniu regiono la kurieroj trovis signojn aŭ sciigojn pri la rajdantoj aŭ aliaj servistoj de l' Malamiko. Eĉ per la Agloj de l' Nebulecaj Montoj ili eksciis freŝajn novaĵojn. Neniu vidis aŭ aŭdis ion pri Golumo; sed la sovaĝaj lupoj daŭre kuniĝis, kaj ĉasis denove fore fonten de la Granda Rivero. Tri el la nigraj ĉevaloj estis tuj trovitaj droninte ĉe la inundita Transpasejo. Sur la rokoj de l' rapidfluo sube, serĉantoj trovis la kadavrojn de kvin pliaj, kaj ankaŭ longan nigran mantelon, tratranĉitan kaj ĉifonan. Pri

la Nigraj Rajdantoj neniu alia postsigno estis videbla, kaj nenie sentiĝis ilia ĉeesto. Ŝajnis, ke ili malaperis el la Nordo.

— Almenaŭ Ok el la Naŭ estas kontrolitaj, — diris Gandalfo. — Estas malsaĝe tro certi, tamen mi opinias, ke ni jam rajtas esperi, ke la Ringofantomoj estis dispelitaj, kaj devigataj reveni laŭeble bontrove al sia Mastro en Mordoro, malplenaj kaj senformaj. Se tiel estas, pasos iom da tempo antaŭ ol ili kapablos rekomenci la persekutadon. Kompreneble la Malamiko havas aliajn servistojn, sed ili devos vojaĝi longan distancon ĝis la limoj de Rivendelo antaŭ ol elflari nian spuron. Kaj se ni estos singardaj, tiu estos malfacile trovebla. Sed ni jam ne devas prokrasti.

Elrondo alvokis al si la hobitojn. Li rigardis seriozmiene Frodon.

— Jam tempo estas, — li diris. — Se la Ringo estas elironta, ĝi devos eliri baldaŭ. Sed tiuj, kiuj ĝin akompanos, devas ne kalkuli pri helpo milita aŭ potenca dum sia misio. Ili devos eniri la regnon de la Malamiko, malproksime de helpo. Ĉu vi daŭre ripetas vian promeson, Frodo, ke la Ringoportanto estos vi?

— Mi tion faras, — diris Frodo. — Mi iros kun Sam.

— Do mi ne povas vin multe helpi, eĉ ne per konsiloj, — diris Elrondo. — Mi antaŭvidas malmulton pri via vojo; kaj kiel via tasko estas plenumota mi ne scias. La Ombroj jam alrampis la subon de l' Montoj, kaj proksimiĝas eĉ al la bordoj de Grizinundo; kaj sub la Ombro ĉio estas por mi malluma. Vi renkontos multajn kontraŭulojn, iujn malkaŝajn, iujn trompvestitajn; kaj vi eble trovos amikojn survoje tiam, kiam vi malplej atendos tion. Mi sendos mesaĝojn, kiajn mi povos aranĝi, al miaj konatoj en la vasta mondo, sed tiom danĝerplenaj iĝis jam la landoj, ke kelkaj eble maltrafos aŭ alvenos ne pli rapide ol vi mem.

» Mi elektos por vi kunulojn por akompani vin, kiom permesos ilia vojo aŭ la sorto. La nombro devas esti malgranda, ĉar via espero troviĝas en rapideco kaj sekreteco. Se mi havus amason da elfoj armitaj kiel dum la Praaj Tagoj, tio malmulte utilus, krom por averti la potencon de Mordoro.

» La Kunularo de l' Ringo estos Naŭ, kaj kontraŭ la Naŭ Rajdantoj, kiuj estas misaj, stariĝos la Naŭ Marŝantoj. Kun vi kaj via fidela servisto iros Gandalfo, ĉar tio ĉi estos lia granda tasko, kaj eble la fino de liaj laboroj.

» Pri la ceteraj, ili reprezentos la aliajn liberajn popolojn de la Mondo: elfoj, gnomoj kaj homoj. Legolaso reprezentos la elfojn; kaj Gimlio filo de Gloino la gnomojn. Ili pretas iri almenaŭ ĝis la trapasejoj de la Montoj, kaj eble pli. El homoj vi havos Aragornon, filon de Aratorno, ĉar la Ringo de Isilduro proksime koncernas lin.

— Ĉu Paŝegulo! — kriis Frodo.

— Jes, — tiu diris ridetante. — Mi petas denove permeson esti via

kunulo, Frodo.

— Mi estus peteginta, ke vi venu, — diris Frodo, — se mi ne supozus vin ironta al Minaso Tirit kun Boromiro.

— Mi tion faros, — diris Aragorno. — Kaj la Glavo-kiu-estis-Rompita estos reforĝita antaŭ ol mi ekiros militen. Sed via vojo kaj nia vojo samas dum multaj centoj da mejloj. Sekve ankaŭ Boromiro troviĝos en la Kunularo. Li estas kuraĝulo.

— Restas trovotaj ankoraŭ du, — diris Elrondo. — Tiujn mi pripensos. En mia domanaro mi eble trovos iujn, kiujn sendi ŝajnos al mi oportune.

— Sed tio lasos neniun lokon por ni! — kriis Grinĉjo konsternite. — Ni ne deziras postresti. Ni deziras akompani Frodon.

— Tio estas, ĉar vi ne komprenas kaj ne povas imagi tion, kio kuŝas antaŭe, — diris Elrondo.

— Ankaŭ Frodo ne, — diris Gandalfo, neatendite subtenante Grinĉjon. — Cetere, neniu el ni vidas klare. Estas vere, ke se tiuj hobitoj komprenus la danĝeron, ili ne aŭdacus iri. Sed ili daŭre dezirus iri, aŭ dezirus, ke ili aŭdacus, kaj estus hontigitaj kaj malfeliĉaj. Mi opinias, Elrondo, ke estus bone fidi prefere ilian amikecon ol grandan saĝon. Eĉ se vi elektus por ni elfan princon, ekzemple Glorfindelon, li ne povus sturmataki la Malhelan Turon, nek liberigi vojon al la Fajro per sia ena potenco.

— Vi parolas prave, — diris Elrondo, — sed mi estas dubema. La Provinco, mi antaŭsentas, ne estas libera de danĝeroj; kaj tiujn du mi intencis resendi tien kiel kurierojn, por laŭeble, laŭ la maniero de sia lando, averti la popolon pri ties danĝero. Ĉiuokaze, mi taksas, ke la pli juna el tiuj du, Peregrino Tjuko, devus resti. Mia koro kontraŭas lian iradon.

— Tiuokaze, Mastro Elrondo, vi devos min enkarcerigi, aŭ sendi min hejmen ligite en sako, — diris Grinĉjo. —. Ĉar alie mi sekvos la Kunularon.

— Do tiel estu. Vi iros, — diris Elrondo kaj ĝemspiris. — Jen la sumo de la Naŭ estas kompleta. Post sep tagoj la Kunularo devos foriri.

La Glavo de Elendilo estis reforĝita de elfaj forĝistoj, kaj sur ĝia klingo estis gravurita blazono de sep steloj intermetitaj inter la lunarko kaj la radia suno, kaj ĉirkaŭ tio estis skribitaj multaj runoj, ĉar Aragorno, filo de Aratorno, estis ekmilitonta ĉe la limoj de Mordoro. Tre hela estis tiu glavo, kiam ĝi estis renovigita; en ĝi brilis ruĝe la lumo de la suno, kaj la lumo de l' luno brilis fride, kaj ĝia eĝo estis malmola kaj akra. Kaj Aragorno donis al ĝi nomon novan kaj nomis ĝin Andurilo, Flamo de l' Okcidento.

Aragorno kaj Gandalfo promenadis kune au sidis parolante pri sia vojo kaj la renkontotaj danĝeroj; kaj ili pripensis la rakontajn kaj figuritajn mapojn kaj klerolibrojn, kiuj estis en la domo de Elrondo. Kelkfoje ĉeestis Frodo; sed li estis kontenta sin apogi per ilia gvidado, kaj li pasigis laŭeble

multe da tempo kun Bilbo.

Dum tiuj lastaj tagoj la hobitoj sidis kune vespere en la Halo de Fajro, kaj tie inter multaj rakontoj ili aŭdis la plenan historion pri Bereno kaj Lutiena kaj la akiro de l' Granda Juvelo; sed dum la tagoj, dum Gaja kaj Grinĉjo vagadis ekstere, Frodo kaj Sam troviĝis kun Bilbo en ties propra eta ĉambro. Tiam Bilbo kutimis laŭtlegi ĉerpaĵojn el sia libro (kiu ŝajnis ankoraŭ tre nekompleta), aŭ fragmentojn el siaj versaĵoj, aŭ prinoti aventurojn de Frodo.

Matene en la lasta tago Frodo kunestis sola kun Bilbo, kaj la maljuna hobito eltiris el sub sia lito lignan skatolon. Li levis la kovrilon kaj palpaĉis interne.

— Via glavo estis rompita, ĉu ne, — li diris heziteme al Frodo; — kaj mi pensis, ke eble vi ŝatus havi tion ĉi, ĉu ne vere?

Li elprenis el la skatolo glaveton en malnova malneta leda ingo. Poste li eltiris ĝin, kaj ĝia polurita kaj bone prizorgita klingo subite ekbrilis, malvarma kaj hela.

— Ĝi estas Piko, — li diris kaj plonĝis ĝin per malmulte da peno en lignan trabon. — Prenu ĝin, se vi emas. Mi ne plu bezonos ĝin, supozeble.

Frodo akceptis ĝin dankoplene.

— Ankaŭ estas la jena! — diris Bilbo, eligante pakaĵon, kiu ŝajnis iom peza rilate al la grandeco. Li malvolvis plurajn faldaĵojn da malnova ŝtofo, kaj alte levis maŝkirason. Ĝi estis dense plektita el multaj ringoj, preskaŭ tiel fleksebla kiel lino, glacie malvarma, kaj pli malmola ol ŝtalo. Ĝi brilis kiel lunlumata arĝento, kaj trapunktita de blankaj gemoj. Kun ĝi estis zono el perloj kaj kristaloj.

— Bela aĵeto, ĉu ne? — diris Bilbo, movante ĝin en la lumo. — Kaj utila. Ĝi estas mia gnoma maŝkiraso, kiun donis al mi Torino. Mi reakiris ĝin de Mult-Fosejo antaŭ ol mi ekvojaĝis, kaj enpakis ĝin kun miaj portaĵoj. Mi forportis ĉiujn memoraĵojn pri mia Vojaĝo, krom la Ringo. Sed mi ne atendis, ke mi uzos tion ĉi, kaj mi jam ne bezonas ĝin, krom por foje alrigardi ĝin. Oni apenaŭ sentas pezon, surmetinte ĝin.

— Mi aspektus — nu, al mi ŝajnas, ke mi ne aspektus normale en ĝi, — diris Frodo.

— Ĝuste tion mi mem diris, — diris Bilbo. — Sed ne ĝenu vin pri la aspekto. Vi povas surmeti ĝin sub la eksteraj vestaĵoj. Konsentu! Vi devas dividi kun mi tiun ĉi sekreton. Ne diru al iu ajn alia! Sed mi sentus min pli feliĉa, se mi scius, ke vi portas ĝin. Mi kredas, ke ĝi forturnos eĉ la tranĉilojn de l' Nigraj Rajdantoj, — li finis per malalta voĉo.

— Nu bone, mi prenos ĝin, — diris Frodo. Bilbo surmetis ĝin al li, kaj alligis Pikon al la ekbrila zono; kaj poste Frodo survestis siajn malnovajn

vetermakulitajn pantalonon, ĉemizon kaj jakon.

— Kiel nur ordinara hobito vi aspektas, — diris Bilbo. — Sed ĉe vi estas jam pli, ol aperas supraĵe. Bonan ŝancon al vi! — li forturnis sin kaj elrigardis tra la fenestro, provante zumi melodion.

— Mi ne scias danki vin konvene, Bilbo, pro tiu ĉi, kaj pro ĉiuj viaj pasintaj bonfaroj, — diris Frodo.

— Ne provu! — diris la maljuna hobito, turniĝante kaj dorsfrapante lin. — Aj! — li kriis. — Vi estas jam tro malmola por esti frapata! Sed jen vi havas: hobitoj devas lojali unu al alia, kaj precipe Baginzoj. Nur tion mi petas reciproke: gardu vin laŭeble bone, kaj reportu laŭeble multe da novaĵo, kaj iujn malnovajn kantojn kaj rakontojn, kiujn vi aŭdos. Mi klopodos finverki mian libron antaŭ via reveno. Mi volus skribi la duan libron, se mi travivos. — Li eksilentis kaj turnis sin denove al la fenestro, kantante mallaŭte.

Mi sidas apud fajr', pensante
pri l' vivo konsidere,
pri razenfloroj, papilioj,
viditaj prasomere;

pri foliflavo kaj filandro
aŭtune fantaziaj,
kun nebulet' kaj sun' arĝenta,
kaj vent' tra l' haroj miaj.

Mi sidas apud fajr', pensante
kia la mondo estos
dum vintro, kies primaveron
mi mem ne vivatestos.

Ĉar multas la aferoj, kiujn
ne konis miaj spertoj:
ja ĉiujare dum printempo
malsamas arbaj verdoj.

Mi sidas apud fajr', pensante
pri l' homoj de l' fondiĝo,
kaj tiuj, kiuj vidos mondon
post mia elmondiĝo.

Sed dum mi sidas kaj pripensas
pratempajn memorkroĉojn,
mi volus aŭdi revenantojn

kaj ĉe la pordo voĉojn.

Estis malvarma griza tago proksime al la fino de decembro. La Orienta Vento traflugis la nudajn branĉojn de l' arboj, kaj ŝaŭmis inter la malhelaj pinoj sur la montetoj. Nubĉifonoj rapidis superkape, malhelaj kaj malaltaj. Dum la mornaj ombroj de l' fruvespero komencis alveni, la Kunularo pretiĝis por eliro. Ili intencis ekiri en la krepusko, ĉar Elrondo konsilis al ili vojaĝi sub kovro de la nokto kiel eble plej multe, ĝis ili troviĝos tre malproksime de Rivendelo.

— Vi devus timi pri la multaj okuloj de l' servistoj de Saŭrono, — li diris. — Sendube novaĵo pri la perturbo de l' Rajdantoj jam atingis lin, kaj li estas kolerplena. Baldaŭ jam liaj spionoj perpiede kaj perflugile disiros en la nordaj landoj. Eĉ pri la ĉielo supre vi devos esti singardaj dum la vojaĝo.

La Kunularo kunportis malmulte da milita ekipaĵo, ĉar ĝi esperis pri sekreteco, ne pri batalado. Aragorno havis Andurilon, sed neniun alian armilon, kaj li eliris vestite nur per rustecaj verdo kaj bruno, kiel disirulo en la sovaĝejo. Boromiro havis longan glavon, forme similan al Andurilo, sed malpli antikvan, kaj li portis ankaŭ ŝildon kaj sian militkornon.

— Laŭte kaj klare ĝi sonas en la valoj de l' montetoj, — li diris, — kaj tiam fuĝu ĉiuj malamikoj de Gondoro! — Metinte ĝin al siaj lipoj li blovis klarione, kaj la eĥoj saltis de roko al roko, kaj ĉiuj en Rivendelo, kiuj aŭdis tiun voĉon salte stariĝis.

— Prokrastema vi devus esti, Boromiro, pri nova klariono, — diris Elrondo, — ĝis vi staros denove sur la limoj de via lando, kaj vi spertos urĝan bezonon.

— Eble, — diris Boromiro. — Sed ĉiam mi kriigis mian kornon ekirante, kaj kvankam poste ni eble marŝos en la ombroj, mi rifuzas eliri kvazaŭ ŝtelisto dumnokte.

Nur la gnomo Gimlio malkaŝe portis mallongan maŝkirason, ĉar gnomoj bagateligas ŝarĝojn, kaj ĉe lia zono estis larĝklinga hakilo. Legolaso havis pafarkon kaj sagujon, kaj ĉe la zono portis longan blankan tranĉilon. La pli junaj hobitoj portis la glavojn, kiujn ili akiris en la dolmeno; sed Frodo prenis nur Pikon; kaj lia maŝkiraso, laŭ la deziro de Bilbo, restis kaŝita. Gandalfo portis sian bastonon, sed al lia flanko estis ligita la elfa glavo Glamdringo, ĝemelo de Orkristo, kiu kuŝis nun sur la brusto de Torino sub la Soleca Monto.

Ĉiuj ricevis de Elrondo sufiĉe da dikaj varmaj vestaĵoj, kaj ili havis jakojn kaj mantelojn kun fela subŝtofo. Rezervaj manĝaĵoj, vestaĵoj, lankovriloj kaj aliaj bezonaĵoj estis ŝarĝitaj sur poneon, neniun alian ol tiun kompatindan beston, kiun ili venigis el Brio.

La restado en Rivendelo mirinde ŝanĝis ĝin: ĝi iĝis muara kaj ŝajnis

posedi la viglecon de la junaĝo. Estis Sam, kiu insistis elekti ĝin, deklarante, ke Vilĉjo (kiel li nomis ĝin) sopirvelkos, se ĝi ne kuniros.

— Tiu besto preskaŭ kapablas paroli, — li diris, — kaj fakte parolus, se ĝi restus ĉi tie ankoraŭ pli longe. Ĝi ĵetis al mi rigardon tiel Maran, Mel povus s-ro Grinĉjo ĝin elparoli: se vi ne permesos al mi kuniri, Sam, mi sekvos proprarimede.

Do Vilĉjo estis ekvojaĝanta kiel ŝarĝbesto, tamen ĝi estis la nura ano de la Kunularo, kiu ne ŝajnis deprimita.

Ili adiaŭis apud la fajro en la granda halo, kaj ili jam atendis nur Gandalfon, kiu ankoraŭ ne eliris el la domo. Ekbrilo da fajrolumo elvenis tra la malfermitaj pordoj, kaj malhelaj lumoj ardis en multaj fenestroj. Bilbo volvite per mantelo staris silente sur la sojlo apud Frodo. Aragorno sidis kun la kapo klinita ĝis la genuoj; nur Elrondo sciis, kion signifas al li tiu ĉi horo. La aliaj estis videblaj kiel grizaj figuroj en la malhelo.

Sam staris apud la poneo, suĉante siajn dentojn, kaj fiksrigardante maltrankvile en la mallumon, kie la rivero bruis sude ŝtonece; lia emo al aventuro estis ĉe nadiro.

— Vilĉjo, knabo, — li diris, — erare vi aliĝis al ni. Vi povintus resti ĉi tie kaj manĝi plej bonan fojnon ĝis venos la nova herbo. — Vilĉjo tikigis sian voston kaj diris nenion.

Sam alĝustigis la tornistron sur siaj ŝultroj, kaj listigis mense en maltrankvilo ĉion, kion li enpakis en ĝin, scivolante ĉu ion li forgesis: lia ĉefa ŝatataĵo la kuirilaro; eta skatolo da salo, kiun li ĉiam kunportis kaj replenigis laŭ la eblecoj; konvena stoko da pip-herbo (sed certe tute ne sufiĉa); siliko kaj tindro; lanaj ŝtrumpoj; linaĵo; diversaj etaj posedaĵoj de lia mastro, pri kiuj Frodo forgesis kaj Sam estis pakinta por povi triumfe aperigi ilin, kiam ili estus bezonataj. Li mense listigis ĉiujn.

— Ŝnuro! — li murmuris. — Neniom da ŝnuro! Kaj ĝuste hieraŭ vespere vi diris al vi: “Sam, kio pri peco da ŝnuro? Ĝi mankos al vi, se vi malhavos ĝin!” Nu, ĝi mankos al mi. Mi jam ne povas akiri ĝin.

Tiumomente Elrondo elvenis kun Gandalfo, kaj li alvokis al si la Kunularon.

— Jen miaj lastaj vortoj, — li diris per mallaŭta voĉo. — La Ringoportanto ekiras por serĉi la Monton de Sorto. Nur sur lin estas metita la ordono: nek forĵeti la Ringon, nek havigi ĝin al iu ajn servisto de la Malamiko, nek efektive permesi al iu ajn preni ĝin, krom membroj de la Kunularo kaj la Konsilio, kaj nur en krizo plej urĝa. La aliaj akompanas lin kiel liberaj kunuloj, por helpi lin sur lia vojo. Vi rajtas resti, reveni aŭ devii sur aliajn padojn, kiel la hazardo ebligas. Ju pli malproksimen vi iros, des malpli facile estos por vi rezigni; tamen nek ĵuro nek interkonsento devigas

vin iri pli malproksimen ol vi volos, ĉar vi ankoraŭ ne scias la forton de viaj koroj, kaj vi ne povas antaŭvidi, kion renkontos ĉiu sur la vojo.

— Malfidela estas tiu, kiu adiaŭas, kiam la vojo malheliĝas, — diris Gimlio.

— Eble, — diris Elrondo, — sed tiu ne ĵuru, ke li marŝos en la mallurno, kiu ankoraŭ ne vidis la noktiĝon.

— Tamen ĵuro povas koron tremantan fortigi, — diris Gimlio.

— Aŭ ĝin frakasi, — diris Elrondo. — Rigardu ne tro foren antaŭ vi! Sed ekiru jam kun bravaj koroj! Adiaŭ, kaj kuniru vin beno de la elfoj kaj la homoj kaj ĉiuj liberuloj. La steloj brilu sur viajn vizaĝojn!

— Bonan... bonan ŝancon! — kriis Bilbo, balbutante pro la malvarmo. — Supozeble vi ne povos skribi taglibron, Frodo mia knabo, sed mi atendos plenan rakonton post via reveno. Kaj ne tro prokrastu! Adiaŭ!

Multaj aliaj domanoj de Elrondo staris en la ombroj kaj rigardis ilian foriron, adiaŭante per mallaŭtaj voĉoj. Aŭdiĝis neniu ridado, nek kanto nek muziko. Fine ili forturniĝis kaj silente malaperis en la krepuskon.

Ili transiris la ponton kaj serpentumis malrapide supren laŭ la longaj apikaj padoj, kiuj eliris el la fendita valo de Rivendelo; kaj ili alvenis finfine al la alta erikejo, kie vento siblis tra la eriko. Poste, post unu ekrigardo al la Lasta Hejmeca Domo ekbrilanta sube, ili elpaŝis en la profundan nokton.

Ĉe la transpasejo de Bruineno ili forlasis la Vojon kaj turniĝinte suden pluiris laŭ mallarĝaj padoj inter faldiĝintaj terenoj. Ili intencis iri tiudirekten okcidente de l' Montaro tra multaj mejloj kaj tagoj. La tereno estis pli malglata kaj pli dezerta ol en la verda valo de l' Granda Rivero en Sovaĝujo trans la Montaro, kaj la progreso estus malrapida; sed ili esperis tiamaniere eskapi atenton de okuloj neamikaj. La spionoj de Saŭrono ĝis tiam estis malmulte viditaj en tiu ĉi malplena tereno, kaj la padoj estas malmulte konataj krom al la rivendelanoj.

Gandalfo marŝis antaŭe, apud li iris Aragorno, kiu konis tiun ĉi terenon eĉ en la mallumo. La aliaj spaliris malantaŭe, kaj Legolaso, kies okuloj vidis akre, iris la lasta. La unua parto de ilia vojaĝo estis malfacila kaj teda, kaj Frodo memoris malmulton pri ĝi, krom pri la vento. Dum multaj tagoj sensunaj glacia blovo venis el la Montaro oriente, kaj neniu vestaĵo ŝajnis kapabla forbari ties penetrajn fingrojn. Kvankam la Kunularo estis taŭge vestita, oni malofte sentis sin varma, ĉu irante ĉu ripozante. Ili dormis maltrankvile dum la mezo de la tago, en iu kavo de la tereno, aŭ kaŝiĝinte sub la implikitaj domarbustoj, kiuj kreskis dense en multaj lokoj. Malfrue posttagmeze vekis ilin la vaĉulo, kaj ili englutis sian ĉefmanĝon: kutime malvarman kaj negajigan, ĉar malofte ili povis riski ekbruligon de fajro. Vespere ili pluiris, ĉiam tiel suden, kiel troveblis vojo.

Unue ŝajnis al la hobitoj ke, kvankam ili marŝis kaj stumblis ĝis ili laciĝis, ili rampas antaŭen helikece kaj neniom antaŭeniras. Ĉiutage la tereno aspektis sufiĉe simila al tiu de la hieraŭo. Tamen iom post iom la montoj proksimiĝis. Sude de Rivendelo ili eĉ pli altiĝis, kaj kurbiĝis okcidenten; kaj ĉirkaŭ la suboj de l' ĉefa montoĉeno estis kvazaŭ renversite ĉiam pli larĝa lando de mornaj montetoj, kaj profundaj valoj plenaj je turbulentaj akvoj. Padoj estis malmultaj kaj serpentumaj, kaj kondukis ilin ofte nur ĝis la rando de iu apika falejo, aŭ suben en perfidajn marĉojn.

Ili survojis du semajnojn, kiam la vetero aliiĝis. La vento subite moderiĝis, kaj poste turniĝis suden. La rapidaj nuboj leviĝis kaj forvaporiĝis, kaj la suno aperis, pala kaj hela. Venis malvarma klara tagiĝo fine de longa stumbla nokt-marŝado. La vojaĝantoj alvenis malaltan verton kronitan per antikvaj ileksoj, kies grizverdaj trunkoj ŝajnis konstruitaj el la ŝtono mem de la montetoj. Iliaj malhelaj folioj brilis kaj iliaj beroj ardis ruĝe en la lumo de l' leviĝanta suno.

Fore en la sudo Frodo povis vidi la malklarajn formojn de altegaj montoj, kiuj nun ŝajnis traarki la padon, kiun la Kunularo sekvis. Maldekstre de tiu alta montaro leviĝis tri montopintoj; la plej alta kaj plej proksima baŭmis kvazaŭ dento neĝverta; ĝia granda, nuda, norda krutegaĵo ankoraŭ estis grandparte en ombro, sed kie la sunlumo oblikvis sur ĝin ĝi ardis ruĝe.

Gandalfo staris flanke de Frodo kaj elrigardis sub sia mano.

— Ni faris bone, — li diris. — Ni alvenis la limon de tiu lando, kiun la homoj nomas Holino; multaj elfoj loĝis ĉi tie dum tagoj pli feliĉaj, kiam Eregiono estis ĝia nomo. Cent kvindek mejlojn laŭ la flugo de korvo ni progresis, kvankam niaj piedoj tramarŝis multajn longajn mejlojn pli. La tereno kaj la vetero estos jam pli moderaj, sed eble tiom pli danĝeraj.

— Ĉu aŭ ne danĝere, reala aŭroro estas tre bonvena, — diris Frodo, retropuŝante sian kapuĉon kaj ebligante, ke la matena lumo trafu lian vizaĝon.

— Sed la montoj staras antaŭ ni, — diris Grinĉjo. — Ni verŝajne turniĝis orienten dum la nokto.

— Ne, — diris Gandalfo. — Sed oni vidas pli foren en la klara lumo. Post tiuj montpintoj la montaro kurbiĝas sud-okcidenten. Multaj mapoj troviĝas en la domo de Elrondo, sed supozeble neniam venis al vi en la kapon ilin rigardi?

— Jes, mi foje rigardis, — diris Grinĉjo, — sed mi ne memoras ilin. Frodo pli kompetentas pri tiaj aferoj.

— Mapon mi ne bezonas, — diris Gimlio, kiu alvenis kun Legolaso, kaj rigardis antaŭen kun stranga lumo en siaj profundaj okuloj. — Tiu estas la

lando, kie laboris pratempe niaj prapatroj, kaj ni gravuris bildon de tiuj montoj sur multaj metalaĵoj kaj ŝtonaĵoj, kaj en multaj kantoj kaj rakontoj. Ili staturas altaj en niaj sonĝoj: Barazo, Zirako, Ŝaturo. Nur unu fojon antaŭe mi jam vidis ilin de malproksime en la maldorma vivo, sed mi konas ilin kaj iliajn nomojn, ĉar sub ili kuŝas Ĥazad-Dumo, la Gnoma Regno, kiu nuntempe nomiĝas la Nigra Ŝakto, Morio laŭ la elfa lingvo. Tie staras Barazinbaro, la Ruĝkorno, kruela Karadraso; post ĝi estas Sivertino kaj Nubkapo: Celebdilo la Blanka, kaj Fanuidolo la Griza, kiujn ni nomas Zirak-Zigilo kaj Bundušaturo. Tie disduiĝas la Nebuleca Montaro, kaj inter ties brakoj kuŝas la profundombra valo, kiun ni ne kapablas forgesi: Azanulbizaro, la Dimrila Valo, kiun la elfoj nomas Nanduhiriono.

— Ĝuste al la Dimrila Valo ni celas, — diris Gandalfo. — Se ni grimpos la trapasejon, kiu nomiĝas la Ruĝkorna Pordo, sub la fora deklivo de Karadraso, ni descendos per la Dimrila Ŝtuparo en la profundan valon de la gnomoj. Tie kuŝas la Spegullago, kaj tie la rivero Arĝentvejno komenciĝas en siaj glaciecaj fontoj.

— Malhelas la akvo de Ĥeled-Zaramo, — diris Gimlio, — kaj frostas la fontoj de Kibil-Nalao. Mia koro tremas pro la penso, ke mi eble vidos ilin baldaŭ.

— Ke vi plezuru je la vido, bona gnomo! — diris Gandalfo. — Sed kion ajn faros vi, almenaŭ ni ne povos resti en tiu valo. Ni devos iri laŭ la Arĝentvejno en la sekretajn arbarojn, kaj poste ĝis la Granda Rivero, kaj poste...

Li paŭzis.

— Jes, kaj poste kien? — demandis Gaja.

— Ĝis la fino de l' vojaĝo — finfine, — diris Gandalfo. — Ni ne povas tro antaŭrigardi. Ni ĝoju, ke la unua stadio estas senkrize plenumita. Al mi ŝajnas, ke ni ripozu ĉi tie, ne nur hodiaŭ tage, sed ankaŭ hodiaŭ nokte. Holino sentigas etoson sanan. Tereno devas sperti multege da misaĵo antaŭ ol ĝi tute forgesos pri la elfoj, se ili iam loĝadis tie.

— Tio estas vera, — diris Legolaso. — Sed la elfoj de tiu ĉi tereno estis raso nekonata al ni, arbarloĝantoj, kaj la arboj kaj la herbo ne plu memoras ilin. Mi aŭdas lamenti pri ili nur la ŝtonojn: *profunde ili elfosis nin, bele ili masonis nin, alte ili konstruis nin, sed ili estas foririntaj*. Ili estas foririntaj. Ili jam delonge trovis la Havenojn.

Tiumatene ili bruligis fajron en profunda kavo kaŝita de grandaj ileksoj, kaj ilia vesper-matenmanĝo estis pli gaja ol de kiam ili ekvojaĝis. Ili ne rapidis kaŝiĝi poste, ĉar ili atendis tradormi la tutan nokton, kaj ili ne intencis pluiri ĝis la vespero de l' posta tago. Nur Aragorno estis silenta kaj maltrankvila. Post kelka tempo li forlasis la Kunularon kaj vagis sur la

verton; tie li staris en ombro de arbo, rigardante suden kaj okcidenten, kun la kapo klinita kvazaŭ li aŭskultus. Poste li revenis al rando de l' valo kaj subenrigardis al la ceteraj, kiuj ridadis kaj babiladis.

— Kio ĝenas vin, Paŝegulo? — Gaja alvokis lin. — Kion vi serĉas? Ĉu mankas al vi la orienta vento?

— Tute ne, — li respondis. — Sed mankas al mi io. Mi estis en Holino divers-sezone. Neniu persono nun loĝas ĉi tie, sed multaj aliaj kreitoj ĉiam estis ĉi tie, precipe birdoj. Tamen nun ĉiuj krom vi silentas. Tion mi sentas. Neniu sono aŭdiĝas ĉirkaŭ ni tra multaj mejloj, kaj viaj voĉoj ŝajnas eĥigi la teron. Tion mi ne komprenas.

Gandalfo alrigardis lin, subite interesiĝante.

— Sed kion vi konjektas kiel la klarigon? — li demandis. — Ĉu temas pri pli ol surprizo pro apero de kvar hobitoj, se ne paroli pri ni ceteraj, kie malofte vidiĝas aŭ aŭdiĝas personoj?

— Espereble temas pri tio, — respondis Aragorno. — Sed mi sentas ian atentemon, kaj timon, kian mi neniam antaŭe spertis ĉi tie.

— Do ni devos esti pli singardaj, — diris Gandalfo. — Se oni kunprenas disirulon, estas bone atenti lin, precipe se tiu disirulo estas Aragorno. Ni devas ĉesigi laŭtan paroladon, ripozi kviete, kaj starigi vaĉon.

Estis la vico de Sam tiutage esti la unua vaĉanto, sed Aragorno aliĝis al li. La aliaj ekdormis. Poste la silento kreskis tiom, ke eĉ Sam sentis ĝin. La spirado de l' dormantoj estis klare aŭdebla. La susuro de l' ponea vosto kaj okazaj moviĝoj de l' poneaj piedoj iĝis laŭtaj bruoj. Sam povis aŭdi grincon de l' propraj artikoj, se li ekmoviĝis. Ĉirkaŭis lin kompleta silento, kaj super ĉio pendis sennuba blua ĉielo, dum la suno ascendis el la oriento. Fore en la sudo aperis malhela makulo, ĝi pligrandiĝis kaj peliĝis norden kvazaŭ fumo fluganta sur vento.

— Kio estas tio, Paŝegulo? Ĝi ne aspektas nube, — diris Sam flustre al Aragorno. Tiu ne respondis, li fikse rigardis la ĉielon; sed postnelonge Sam povis mem vidi, kio senhalte proksimiĝas. Birdoj, flugantaj rapidege, ĉirkaŭflugis kaj rondiris, kaj transiradis la tutan terenon kvazaŭ ili serĉus ion kaj iom post iom ili pliproksimiĝis.

— Kuŝu plate kaj senmove! — siblis Aragorno, subentirante Samon en la ombron de ileksoj, ĉar tuta regimento da birdoj subite disiĝis de la ĉefa birdaro, kaj alvenis, flugante malalte, rekte al ili. Al Sam ŝajnis, ke ili estas speco de grandaj korvoj. Kiam ili pasis supre, en tiom densa aro, ilia ombro sekvis ilin malhele sur la tero sube, raŭka grako aŭdiĝis.

Aragorno ne leviĝis ĝis ili malaperis en la foron, norde kaj okcidente, kaj la ĉielo iĝis denove senviva. Tiam li salte leviĝis kaj iris por veki Gandalfon.

— Regimentoj da nigraj korvoj transflugas la tutan terenon inter la Montoj kaj la Grizinundo, — li diris, — kaj ili pasis super Holino. Ili ne estas indiĝenaj ĉi tie; ili estas *crebain* el Fangorno kaj Dunlando. Mi ne scias, kion ili celas, eble estas ia danĝero sude, de kiu ili fuĝas; sed mi opinias, ke ili spionas la terenon. Mi ekvidis ankaŭ multajn akcipitrojn flugantajn alte sur la ĉielo. Al mi ŝajnas, ke ni devus ekvojaĝi denove ĉi-vespere. Holino ne plu estas saneca por ni: ĝi estas observata.

— Kaj tiuokaze ankaŭ la Ruĝkorna Pordo, — diris Gandalfo, — kaj kiel ni povos transiri tiun nevidate, mi ne povas imagi. Sed pri tio ni pensos, kiam necese. Rilate al ekvojaĝo tuj post la noktiĝo, mi timas, ke vi pravas.

— Feliĉe nia fajro malmulte fumis kaj malardiĝis antaŭ ol venis la *crebain*, — diris Aragorno. — Oni devas estingi kaj ne rebruligi ĝin.

— Nu, jen plago kaj ĝenaĵo! — diris Grinĉjo. La novaĵo: neniu fajro, kaj formoviĝo denove nokte, estis komunikita al li, tuj kiam li vekiĝis en la malfrua posttagmezo. — Nur pro bando da korvoj! Mi antaŭĝojis pri vere elstara manĝaĵo hodiaŭ vespere: io varmega.

— Do vi povas daŭrigi la antaŭĝojon, — diris Gandalfo. — Antaŭ vi estas eble multaj neatenditaj festmanĝoj. Miaflanke, mi ŝatus pipon fumotan en komforto, kaj piedojn pli varmajn. Tamen, pri unu afero ni rajtas esti certaj: iĝos pli varme, kiam ni atingos sudon.

— Tro varme, tre probable, — murmuris Sam al Frodo. — Sed mi ekopinias, ke jam estas tempo, ke ni ekvidu tiun Fajran Monton kaj atingu la finon de la vojo, por tiel diri. Mi pensis unue, ke tiu ĉi Ruĝkorno, aŭ kiel ajn ĝi nomiĝas, certe estas ĝi, ĝis Gimlio ekparolis. Efektiva makzeltordilo devas esti tiu gnoma lingvo! — Mapoj komunikis nenion al la menso de Sam, kaj ĉiuj distancoj en tiuj nekonataj landoj ŝajnis tiel vastaj, ke li konfuziĝis pri sia orientiĝo.

La tutan tagon la Kunularo restis kaŝite. La malhelaj birdoj de tempo al tempo transflugis, sed kiam la subironta suno ruĝiĝis, ili malaperis suden. Je krepusko la Kunularo ekiris, kaj turniĝinte nun duone orienten ili direktiĝis al Karadraso, kiu tre malproksime ankoraŭ ardis malforte ruĝa en la lasta lumo de l' malaperinta suno. Unu post unu blankaj steloj aperis, dum la ĉielo mallumiĝis.

Gvidate de Aragorno ili trovis taŭgan padon. Ĝi aspektis al Frodo kiel restaĵo de antikva vojo, kiu iam estis larĝa kaj zorge planita, de Holino ĝis la tramonta pasejo. La luno, jam plena, leviĝis super la montoj kaj ĵetis palan lumon, en kiu nigris la ombroj de ŝtonoj. Multaj el tiuj ŝajnis mane prilaboritaj, kvankam nun ili kuŝis faligite kaj ruinaj en morna dezerta tereno.

Estis la malvarma frosta horo antaŭ la unua manifestiĝo de l' aŭroro, kaj

la luno malaltis. Frodo suprenrigardis al la ĉielo. Subite li vidis aŭ sentis ombron transpasi la altajn stelojn, kvazaŭ ili momente velkus kaj poste ekbrilus denove. Li ektremis.

— ĉu vi vidis ion transflugi? — li flustris al Gandalfo, kiu estis ĝuste antaŭe.

— Ne, sed mi sentis ĝin, kio ajn ĝi estis, — tiu respondis. — Eble estis nenio, nura ĉifoneto da maldensa nubo.

— Tamen ĝi moviĝis rapide, — murmuris Aragorno, — kaj ne laŭ la vento.

Okazis nenio plu tiun nokton. La posta mateno aŭroris eĉ pli hele ol antaŭe. Sed la aero denove frostis; jam la vento turniĝis denove orienten. Dum du pliaj noktoj ili marŝadis plu, suprenirante grade sed ĉiam pli malrapide dum ilia vojo serpentumis sur la montetaron, kaj la montoj baŭmis pli kaj pli proksime. La trian matenon, antaŭ ili baŭmis Karadraso, potenca monto, kun pinto neĝa kiel arĝento, sed kun apikaj nudaj flankoj, malhelruĝaj, kvazaŭ sangomakulitaj.

La ĉielo estis nigra, kaj la suno palis. La vento jam turniĝis nord-orienten. Gandalfo snufis la aeron kaj retrorigardis.

— Vintro profundiĝas malantaŭ ni, — li diris kviete al Aragorno. — La altaĵoj fornorde estas pli blankaj ol ili estis; neĝo kuŝas longe malsupre de iliaj ŝultroj. Ĉi-nokte ni estos tre alte survoje al la Ruĝkorna Pordo. Nin eble vidos vaĉantoj sur tiu mallarĝa pado, kaj embuskos iu misaĵo; sed la vetero eble pruviĝos malamiko pli danĝera ol ĉiuj. Kion vi nun opinias pri via direktiĝo, Aragorno?

Frodo aŭdis tiujn vortojn kaj komprenis, ke Gandalfo kaj Aragorno daŭrigas debaton delonge komencitan. Li aŭskultis maltrankvile.

— Mia opinio ne estas favora pri nia direktiĝo de komenco ĝis fino, kiel vi bone scias, Gandalfo, — respondis Aragorno. — Kaj danĝeroj konataj kaj nekonataj kreskos dum ni pluiros. Sed ni devas pluiri; kaj ne valoras, ke ni prokrastu trapason de la montoj. Pli sude ne estas pasejoj ĝis la Breĉo de Rohano. Mi ne fidas tiun vojon depost via novaĵo pri Sarumano. Kiu scias la flankon nun servatan de l' militestroj de la reĝo de l' ĉevalmastroj.

— Kiu scias efektive! — diris Gandalfo. — Sed ekzistas alia vojo, kaj ne tra l' pasejo de Karadraso: tiu malhela kaj sekreta vojo, pri kiu ni jam parolis.

— Sed ni ne parolu pri ĝi denove! Ankoraŭ ne. Diru nenion al la aliaj, mi petas, ne ĝis iĝos klare, ke alia vojo ne eblas.

— Ni devas decidi antaŭ ol ni pluiros, — respondis Gandalfo.

— Do ni pesu mense la aferon, dum la aliaj ripozas kaj dormas, — diris Aragorno.

Dum la malfrua posttagmezo, kiam la aliaj finmanĝis, Gandalfo kaj Aragorno iris kune flanken kaj staris rigardante Karadrason. Ties flankoj nun estis malhelaj kaj malafablaj, kaj ĝia verto estis en griza nubo. Frodo alrigardis ilin, scivolante, en kiun direkton iros la debato. Kiam ili revenis al la Kunularo, Gandalfo ekparolis, kaj tiam li sciis, ke estas decidite fronti la veteron kaj la altan pasejon. Li sentis malŝarĝiĝon. Li ne povis konjekti, kiu estis la alia malhela kaj sekreta vojo, sed mencio mem pri ĝi ŝajnis funde maltrankviligi Aragornon, kaj Frodo estis kontenta, ke ĝi estis forlasita.

— Laŭ signoj, kiujn ni vidis lastatempe, — diris Gandalfo, — mi timas, ke la Ruĝkorna Pordo estas vaĉata; kaj mi ankaŭ dubemas pri la vetero, kiu alvenas de malantaŭe. Neĝo eble venos. Ni devas iri laŭ kiel eble plej granda rapideco. Eĉ tiel necesos pli ol du marŝadoj antaŭ ol ni atingos la supron de l' pasejo. Mallumiĝos frue ĉi-vespere. Ni devas foriri tuj post via prepariĝo.

— Mi aldonos konsilon, se mi rajtas, — diris Boromiro. — Mi naskiĝis sub la ombro de l' Blankaj Montoj kaj scias iom pri vojaĝado sur altaĵoj. Ni renkontos fortan malvarmon, se ne ion pli malbonan, antaŭ ol malsupreniri je la kontraŭa flanko. Ne helpos nin resti tiel sekretaj, se ni mortfrostiĝus. Kiam ni foriros de ĉi tie, kie ankoraŭ troviĝas kelkaj arboj kaj arbustoj, ĉiu el ni devus porti po brancofaskon, tiel grandan kiel li kapablas porti.

— Kaj Vilĉjo povus porti ankoraŭ iom, ĉu ne, knabo? — diris Sam. La poneo rigardis lin malĝoje.

— En ordo, — diris Gandalfo. — Sed ni devas ne uzi la lignon, krom se temas pri elekto inter fajro kaj morto.

La Kunularo denove ekmarŝis, unue laŭ kontentiga rapideco, sed baldaŭ ilia vojo iĝis kruta kaj malfacila. La serpentuma kaj suprenira pado multloke preskaŭ malaperis, kaj ĝin baris multaj falintaj ŝtonoj. La nokto iĝis terure malluma sub grandaj nuboj. Frosta vento kirliĝis inter la rokoj. Ĝis noktomezo ili grimpis ĝis la genuoj de la montegoj. Ilia mallarĝa pado nun serpentumis sub kruta muro da klifoj maldekstre, super kiuj la severaj flankoj de Karadraso baŭmis nevideble en la mallumo; dekstre troviĝis abismo da malhelo, kie la tereno subite malsupreniris en profundan ravinon.

Pene ili grimpis apikan deklivon kaj haltis momente ĉe la supro. Frodo sentis sur sia vizaĝo molan ektuŝon. Li etendis sian brakon kaj vidis malhele blankajn neĝerojn sidiĝantaj sur sia maniko.

Ili pluiris. Sed postnelonge la neĝo falis rapide, plenigante la tutan aeron, kaj kirliĝante en la okulojn de Frodo. La malhelaj kurbiĝintaj figuroj de Gandalfo kaj Aragorno, nur unu-du paŝojn antaŭe, apenaŭ videblis.

— Tio ĉi tute ne plaĉas al mi, — anhelis Sam tuj poste. — Neĝo konvenas dum bela mateno, sed mi preferas esti en la lito dum ĝi falas. Mi

ŝatus, ke tiu ĉi provizo iru al Hobiturbo! Eble oni bonvenigus ĝin tie.

Krom sur la altaj erikejoj de Nord-kvarono, peza neĝfalado maloftis en la Provinco, kaj estis taksata okazaĵo agrabla kaj ebleco sporti. Neniu vivanta hobito (escepte de Bilbo) povis memori la Kruelan Vintron de 1311, kiam blankaj lupoj invadis la Provincon tra la glaciiĝinta Brandovino.

Gandalfo haltis. Neĝo densis sur lia kapuĉo kaj liaj ŝultroj; ĝi jam profundis ĝismaleole sur liaj botoj.

— Jen kion mi timis, — li diris. — Kion vi diras nun, Aragorno?

— Ke ankaŭ mi timis ĝin, — Aragorno respondis, — sed malpli ol la aliajn aferojn. Mi sciis pri la risko de neĝo, kvankam ĝi malofte falas tiel peze tiom sude, krom alte sur la montaro. Sed ni ankoraŭ ne estas alte; ni ankoraŭ troviĝas sufiĉe malsupre, kie la padoj kutime estas ireblaj dum la tuta vintro.

— Mi scivolas, ĉu tio ĉi estas ruzaĵo de l' Malamiko, — diris Boromiro. — Oni diras en mia lando, ke li kapablas regi la ŝtormojn en la Ombraj Montoj, kiuj staras ĉe la limo de Mordoro. Li posedas strangajn potencojn kaj multajn aliancanojn.

— Liaj brakoj vere tre longiĝis, — diris Gimlio, — se li kapablas altiri neĝon de la Nordo por ĝeni nin ĉi tie je naŭcent mejloj for.

— Liaj brakoj ja longiĝis, — diris Gandalfo.

Dum ili estis haltintaj la vento malfortiĝis, kaj la neĝo malpliiĝis kaj preskaŭ ĉesis. Ili denove ekmarŝis. Sed apenaŭ ili faris ducent paŝojn, revenis la ŝtormo kun nova furiozo. La vento fajfis kaj la neĝo iĝis blindiga tempesto. Baldaŭ eĉ Boromiro nur malfacile pluiris. La hobitoj, kliniĝintaj preskaŭ ĝistere strebis antaŭen malantaŭ la plialtuloj, sed estis evidente, ke ili ne povos daŭrigi multe pli longe, se la neĝado ne ĉesos. La piedoj de Frodo sentiĝis plumbe. Grinĉjo postrestis. Eĉ Gimlio, tiel brava kiel gnomo povus esti, grumblis dum li trenpaŝis.

La Kunularo haltis subite, kvazaŭ interkonsentinte sen ia ajn parolo. Ili aŭdis fantomecajn bruojn en la ĉirkaŭa mallumo. Tio eble estis nur rezulto de vento tra fendaĵoj kaj ravinetoj de l' rokomuro, sed la sonoj estis akraj krioj kaj sovaĝaj hurloj de ridado. Ŝtonoj komencis fali de la montoflanko, fajfante super iliaj kapoj, aŭ klakante sur la pado apude. De tempo al tempo ili aŭdis mallaŭtan murmuradon, kiam ŝtonego subenruliĝis de l' supraj kaŝitaj altoj.

— Ni ne povas pluiri hodiaŭ nokte, — diris Boromiro. — Kiu volas, tiu nomu tion vento, sed en la aero estas minacaj voĉoj; kaj tiuj ŝtonoj estas celitaj al ni.

— Mi jes nomas tion vento, — diris Aragorno. — Sed tio ne kontraŭdiras tion, kion vi asertas. Ekzistas multaj misaĵoj kaj neamikaĵoj en

la mondo, kiuj malmulte amas tiujn, kiuj iras dupiede, kaj tamen ili ne estas kunligitaj al Saŭrono, sed vartas proprajn intencojn. Iuj estas en tiu ĉi mondo pli longe ol li.

— Karadraso kromnomiĝis la Kruela kaj havis malbonan reputacion, — diris Gimlio, — antaŭ multegaj jaroj, kiam onidiro pri Saŭrono ne estis aŭdita ĉi tie.

— Malmulte gravas, kiu estas la malamiko, se ni ne povos rezisti ties atakon, — diris Gandalfo.

— Sed kion ni povas fari? — kriis Grinĉjo malĝoje. Li estis apogita al Gaja kaj Frodo, kaj li tremadis.

— Aŭ resti, kie ni estas, aŭ reveni, — diris Gandalfo. — Ne valoras pluiri. Nur iom pli alte, se mi trafe memoras, tiu ĉi pado forlasas la klifon kaj kondukas en larĝan malprofundan fosaĵon funde de longa apika deklivo. Tie ni havas azilon nek de neĝo, nek de ŝtonoj — aŭ de io ajn alia.

— Kaj ne valoras reiri dum la ŝtormo daŭras, — diris Aragorno. — Ni pasis neniun lokon dum la supreniro, kiu proponas pli da azilo ol tiu ĉi klifmuro, sub kiu ni nun troviĝas.

— Azilon! — murmuris Sam. — Se tio ĉi estas azilo, do unu muro kaj neniu tegmento konsistigas domon.

Nun la Kunularanoj kuniĝis laŭeble proksime al la klifo. Ĝi frontis al la sudo, kaj proksime al la fundo ĝi iom kliniĝis antaŭen, tiel ke ili esperis, ke ĝi havigos al ili iom da protektado kontraŭ la norda vento kaj falantaj ŝtonoj. Sed sporadaj blovegoj kirliĝis ĉirkaŭ ili ĉiuflanke, kaj la neĝo subenfluis je nuboj ĉiam pli densaj.

Ili kunkaŭris kun la dorsoj kontraŭ la muro. La poneo Vilĉjo staris pacience sed deprimite antaŭ la hobitoj, kaj iom ŝirmis ilin; sed postnelonge la driva neĝo jam atingis ĝiajn flankojn, kaj daŭre plialtiĝis. Se ili malhavus kunulojn pli altkreskajn, la hobitoj baldaŭ estus superinunditaj.

Urĝan dormemon sentis Frodo; li sentis, ke li rapide eniĝas varman kaj malprecizan sonĝon. Li pensis, ke fajro varmigas liajn piedfingrojn, kaj el la ombroj aliflanke de l' kameno li aŭdis paroli la voĉon de Bilbo. *Mi ne alte taksas vian taglibron. Neĝoŝtormo je la dek-dua de januaro: ne necesis reveni por raporti tion*!

Sed mi volis ripozi kaj dormi, Bilbo, kun fortostreĉo Frodo respondis, kaj tiam li sentis sin skuata, kaj li dolore revekiĝis. Boromiro levis lin de la tero el nesto da neĝo.

— Tio ĉi mortigos la duonulojn, Gandalfo, — diris Boromiro. — Estas senutile sidadi ĉi tie ĝis la neĝo kovros niajn kapojn. Ni devas ion fari por nin savi.

— Donu al ili tion ĉi, — diris Gandalfo, serĉante en sia tornistro kaj eltirante ledan likvorujon. — Nur po buŝpleno por ĉiu el ni. Ĝi estas ege valora. Ĝi estas *miruvoro*, distilaĵo de Imladriso. Elrondo donis ĝin al mi, kiam ni disiĝis. Ĉirkaŭigu ĝin!

Tuj post kiam Frodo englutis iom de l' varma kaj aroma likvoro, li spertis novan koroforton, kaj forlasis liajn membrojn la peza dormemo. Ankaŭ la aliaj revigliĝis kaj trovis freŝajn esperon kaj agemon. Sed la neĝo ne malseveriĝis. Ĝi eĉ pli dense kirliĝis ĉirkaŭ ilin, kaj la vento ululis pli laŭte.

— Kion vi opinias pri fajro? — demandis Boromiro subite. — La elekto ŝajnas jam proksima inter fajro kaj morto, Gandalfo. Sendube ni estos kaŝitaj de ĉiuj neamikaj okuloj, kiam la neĝo jam kovros nin, sed tio nin ne helpos.

— Vi rajtas bruligi fajron, se vi povas, — respondis Gandalfo. — Se ekzistas vaĉantoj, kiuj kapablas elteni tiun ĉi ŝtormon, ili povas nin vidi, kun aŭ sen fajro.

Sed kvankam ili kunportis lignon kaj branĉetojn laŭ la konsilo de Boromiro, nek la elfo nek eĉ la gnomo sufiĉe lertis por bruligi flamon, kiu eltenus en la kirliĝanta vento, aŭ ekbrulus en la malseka hejtaĵo. Fine kaj malvolonte Gandalfo mem enmiksiĝis. Preninte branĉofaskon, li tenis ĝin alte dum momento, kaj poste kun ordona frazo *naur an edraith ammen*! li ŝovis al ĝi la finon de sia bastono. Tuj granda ŝpruco de verda kaj blua flamo elsaltis, kaj la ligno ekbrulis kaj sputis.

— Se troviĝas vidantoj, tiam almenaŭ mi estas rivelita al ili, — li diris. — Mi skribis *Gandalfo estas ĉi tie* per signoj, kiujn povas legi ĉiuj de Rivendelo ĝis la elfluejoj de Anduino.

Sed la Kunularo ne plu zorgis pri vaĉantoj aŭ neamikaj okuloj. Iliaj koroj ĝojis vidante la lumon de l' fajro. La ligno brulis vigle; kaj kvankam ĉirkaŭ ĝi la neĝo siblis, kaj flakoj da neĝakvo kreiĝis sub iliaj piedoj, ili varmigis kontente siajn manojn je la flamaro. Tie ili staris, kliniĝante en rondo ĉirkaŭ la etaj dancantaj kaj flagrantaj flamoj. Ruĝa lumo kovris iliajn lacajn kaj zorgoplenajn vizaĝojn; malantaŭ ili la nokto similis nigran muron.

Sed la ligno forbrulis rapide, kaj la neĝo daŭre faladis.

La fajro malardiĝis, kaj la lasta brancaro estis surĵetita.

— La nokto forpasas, — diris Aragorno. — La tagiĝo ne malproksimas.

— Se iu ajn tagiĝo kapablas trabori tiujn nubojn, — diris Gimlio. Boromiro elpaŝis el la rondo kaj fiksrigardis supren en la nigrecon.

— La neĝado malpliiĝas, — li diris, — kaj la vento pli kvietas. Frodo rigardis lace la flokojn ankoraŭ falantajn el la mallumo por momente riveliĝi blanke per la lumo de l' mortanta fajro; sed longe li ne povis vidi indikon, ke ili malpliiĝas. Poste subite, kiam dormo denove komencis inundi lin, li konstatis, ke la vento ja malfortiĝis, kaj la neĝeroj iĝas pli grandaj kaj malpli multaj. Tre malrapide svaga lumo ekaperis. Finfine la neĝado tute ĉesis.

Kiam la lumo plifortiĝis, ĝi rivelis silentan neĝvolvitan mondon. Sub ilia rifuĝejo estis blankaj amasiĝoj kaj kupoloj kaj senformaj profundaĵoj, sub kiuj la pado, kiun ili laŭiris, estis tute malaperinta; sed la altaĵoj supre estis kaŝitaj per grandaj nuboj ankoraŭ pezaj je minaco pri neĝo.

Gimlio rigardis supren kaj skuis sian kapon.

— Karadraso ne pardonis al ni, — li diris. — Ĝi havas ankoraŭ neĝon ĵetotan al ni, se ni pluiros. Ju pli baldaŭ ni retroiros, des pli bone.

Pri tio ĉiuj konsentis, sed ilia reiro estis jam malfacila kaj preskaŭ neebla. Nur kelkajn paŝojn for de l' fajrocindroj la neĝo profundis multajn futojn, pli alta ol la kapoj de l' hobitoj; en kelkaj lokoj ĝi estis ŝovelita kaj amasigita de la vento je grandaj neĝdunoj kontraŭ la klifo.

— Se Gandalfo irus antaŭ ni kun hela flamo, li eble fandigus travojon por vi, — diris Legolaso. La ŝtormo estis malmulte ĝeninta lin, kaj nur li el la Kunularo ankoraŭ havis malpezan koron.

— Se elfoj kapablus superflugi montojn, ili eble alportus la sunon por nin savi, — respondis Gandalfo. — Sed mi devas havi ion por prilabori. Neĝon mi ne kapablas bruligi.

— Nu, — diris Boromiro, — kiam kapoj senpovas, devas uziĝi korpoj, kiel oni diras en mia lando. La plej fortaj el ni devas serĉi vojon. Vidu! Kvankam ĉio estas nun neĝkovrita, nia vojo, kiam ni supreniris, turniĝis ĉirkaŭ tiun rokŝultron, kiu vidiĝas tie. Ĝuste tie la neĝo komencis ŝarĝi nin. Se ni povus atingi tiun lokon, eble pruviĝus pli facile pretere. Ne temas pri pli ol ducent paŝoj, laŭ mia konjekto.

— Do ni trapuŝu vojon ĝis tie, vi kaj mi! — diris Aragorno. Aragorno estis la plej alta en la Kunularo, sed Boromiro, ne multe malpli alta, estis pli larĝa kaj pezkorpa. Li iris antaŭe, kaj Aragorno sekvis lin. Malrapide ili ekiris, kaj baldaŭ strebadis malfacile. En kelkaj lokoj la neĝo atingis la bruston, kaj ofte Boromiro ŝajnis naĝi aŭ trabori per siaj brakegoj anstataŭ marŝi.

Legolaso rigardis ilin dum kelka tempo kun la ridetantaj lipoj, kaj poste li turnis sin al la aliaj.

— La plej fortaj devas serĉi vojon, ĉu? Sed diras mi: plugu plugisto, sed elektu lutron por naĝi, kaj por facila kurado sur herbo, folioj aŭ sur neĝo — elfon.

Tion dirinte li vigle forsaltis, kaj tiam Frodo rimarkis kvazaŭ la unuan fojon, kvankam li delonge sciis tion, ke la elfo havis neniujn botojn, sed portis nur malpezajn ŝuojn, kiel ĉiam, kaj liaj piedoj lasis malmulte da spuro sur la neĝo.

— Adiaŭ! — li diris al Gandalfo. — Mi iras trovi la sunon! — Poste, rapide kiel kuranto sur firma sablo, li forpafiĝis, kaj rapide atinginte la penantajn virojn, kun mansaluto li preterpasis ilin, rapidegis en la foron kaj malaperis post la rokangulon.

La aliaj atendis kunkaŭrinte, rigardante ĝis Boromiro kaj Aragorno iĝis nigraj makuletoj en la blankeco. Fine ankaŭ ili malaperis. Tempo treniĝis. La nuboj malaltiĝis, kaj jam kelkaj neĝeroj denove malsupren kirliĝis.

Pasis ĉirkaŭ unu horo, kvankam tio ŝajnis pli longa, kaj ili finfine ekvidis Legolason revenanta. Samtempe reaperis Boromiro kaj Aragorno ĉirkaŭ la vojkurbo multe malantaŭ li kaj venis penege laŭ la deklivo.

— Nu, — kriis Legolaso alkurante, — la sunon mi ne alportis. Ĝi promenas sur la bluaj kampoj de l' sudo, kaj eta cirklo da neĝo sur tiu ĉi Ruĝkorna monteto ĝin tute ne ĝenas. Sed mi reportis ekbrilon da bona espero por tiuj, kies sorto estas piediri. La plej granda neĝduno el ĉiuj situas tuj post la turniĝo, kaj tie niaj fortuloj preskaŭ entombiĝis. Ili malesperis, ĝis mi revenis kaj sciigis, ke la duno estas ne pli dika ol muro. Kaj aliflanke la neĝo subite malpliiĝas, dum pli sube ĝi estas nenio alia ol kovrileto blanka por friskigi la piedfingrojn de hobito.

— Ha, estas kiel mi diris, — graŭlis Gimlio. — Tio ne estis ŝtormo ordinara. Ĝi estas malicaĵo de Karadraso. Ĝi ne amas elfojn kaj gnomojn, kaj tiu neĝduno estis kreita por malebligi nian eskapon.

— Sed feliĉe via Karadraso forgesis, ke vin akompanas homoj, — diris Boromiro, kiu tiumomente alvenis. — Homoj fortikaj, se mi rajtas tion diri, kvankam homoj malpli fortikaj kun ŝoveliloj eble servus vin pli taŭge. Tamen, ni trapuŝis vojon, kaj pri tio rajtas danki ĉiuj, kiuj ne povas kuri tiel malpeze, kiel elfoj.

— Sed kiel ni atingu tien, eĉ se la drivaĵon vi tratranĉis? — diris Grinĉjo, laŭtigante la penson de ĉiuj hobitoj.

— Esperu! — diris Boromiro. — Mi estas laca, sed ankoraŭ restas al mi iom da forto, kaj ankaŭ Aragorno. Ni portos la etulojn. La aliaj sendube sukcesos paŝi la vojon malantaŭ ni. Venu, Mastro Peregrino! Mi komencos

per vi.

Li levis la hobiton.

— Kroĉiĝu al mia dorso! Miajn brakojn mi bezonos, — li diris, kaj paŝis antaŭen. Aragorno kun Gaja sekvis. Grinĉjo miris pri lia forto, vidante la trapasejon, kiun li jam kreis sen iloj krom M grandaj membroj. Eĉ nun, kvankam ŝarĝita, li plilarĝigis la vojon por tiuj, kiuj sekvos, flankenpuŝante la neĝon dumire.

Ili atingis fine la grandan dunon. Ĝi estis ĵetita tra la montpadon kiel kruta kaj subita muro, kaj ĝia kresto, akra kvazaŭ formita per tranĉiloj, pli ol duoble superis la altecon de Boromiro; sed tra la mezo estis trabatita pasejo, supren-malsupreniranta kiel ponto. Je l' alia flanko Gaja kaj Grinĉjo estis demetitaj, kaj tie ili atendis kun Legolaso ĝis alvenus la cetero de l' Kunularo.

Post kelka tempo Boromiro revenis portante Samon. Malantaŭe sur la mallarĝa sed jam multtretita padeto venis Gandalfo, kondukante Vilĉjon kun Gimlio sidanta inter la pakaĵoj. Lasta venis Aragorno portante Frodon. Ili trapasis la padeton; sed apenaŭ Frodo surteriĝis, kun profunda murmurego subenruliĝis ŝtonfalo kaj glisanta neĝo. Ties ŝaŭmo duonblindigis la Kunularon dum ili kaŭris ĉe la klifo, kaj kiam la aero denove klariĝis, ili ekvidis, ke la vojo estis barita malantaŭ ili.

— Sufiĉe, sufiĉe! — kriis Gimlio. — Ni foriras laŭeble rapide! — Kaj efektive per tiu lasta bato la malico de l' monto ŝajnis elĉerpita, kvazaŭ Karadraso estus kontenta, ke la invadintoj estas repuŝitaj kaj ne aŭdacos reveni. La neĝminaco ĉesis; la nuboj komencis dispartiĝi kaj la lumo plivastiĝis.

Kiel estis raportinta Legolaso, ili trovis, ke la neĝo pograde malprofundiĝis dum la subeniro, tiel ke eĉ la hobitoj povis marŝi. Baldaŭ ili staris denove sur la plataĵo, kie la antaŭan nokton ili sentis la unuajn neĝerojn.

La mateno estis jam tre forpasinta. De l' altaĵo ili rerigardis okcidenten trans la subajn terenojn. Malproksime en la disĵetiĝo de tereno, kiu kuŝis sube de l' monto estis la valo, el kiu ili komencis grimpi la pasejon.

La kruroj de Frodo doloris. Li estis ĝisoste frostigita kaj malsata; kaj lia kapo kirliĝis, kiam li pripensis la longan dolorigan marŝadon suben laŭ la deklivo. Nigraj makuletoj ŝvebis antaŭ liaj okuloj. Li frotis ilin, sed la nigraj makuletoj persistis. Malproksime sube, sed ankoraŭ alte super la submontetoj, malhelaj punktoj ĉirkaŭflugis en la aero.

— La birdoj denove! — diris Aragorno, fingromontrante suben.

— Tion ni jam ne povas eviti, — diris Gandalfo. — Ĉu ili estas bonaj aŭ misaj, aŭ tute ne koncernas nin, ni devas tuj subeniri. Eĉ ne sur la genuoj de

Karadraso ni atendos alian noktiĝon!

Malvarma vento subenbloviĝis malantaŭ ili, kiam ili turnis la dorson al la Ruĝkorna Pordo, kaj stumblis lace malsupren sur la deklivo. Karadraso estis venkinta ilin.

4

Vojaĝo en mallumo

Estis vespere, kaj la griza lumo denove velkis rapide, kiam ili haltis por la nokto. Ili estis tre lacaj. La montojn vualis profundiĝanta krepusko, kaj la vento estis malvarma. Gandalfo permesis al ili ankoraŭ po buŝplenon de la rivendela *miruvoro*. Post kiam ili iom manĝis, li kunvokis interkonsiliĝon.

— Ni kompreneble ne povas pluiri hodiaŭ vespere, — li diris. — La atako kontraŭ la Ruĝkornan Pordon elĉerpis nin, kaj ni devos ripozi ĉi tie dum iom da tempo.

— Kaj poste kien ni iros? — demandis Frodo.

— Antaŭ ni ankoraŭ estas nia vojaĝo kaj nia komisio, — respondis Gandalfo. — Alternativon ni ne havas al pluirado, aŭ reiro al Rivendelo.

La vizaĝo de Grinĉjo videble kontentiĝis pro la nura mencio pri reiro al Rivendelo; Gaja kaj Sam suprenrigardis espereme. Sed Aragorno kaj Boromiro vidigis neniun signon. Frodo aspektis ĝenite.

— Mi ŝatus esti denove tie, — li diris. — Sed kiel mi povu reiri sen honto, krom se fakte ekzistus neniu alternativo, kaj ni estus jam venkitaj?

— Vi pravas, Frodo, — diris Gandalfo, — reiri signifas agnoski malvenkon, kaj fronti al posta malvenko pli grava. Se ni nun reiros, poste la Ringo devos resti tie: ni ne povos denove ekvojaĝi. Poste pli aŭ malpli baldaŭ Rivendelo estos sieĝata, kaj post mallonga kaj amara tempo ĝi estos detruita. La Ringofantomoj estas teruraj malamikoj, sed ili estas ankoraŭ nur ombroj de potenco kaj teruro, kiujn ili posedos se la Reganta Ringo estos denove sur la mano de ilia mastro.

— Do ni devas iri antaŭen, se ekzistas vojo, — diris Frodo ĝemspirante. Sam denove malĝojiĝis.

— Ekzistas vojo, kiun ni povas provi, — diris Gandalfo. — Mi pensis ekde la komenco, kiam mi la unuan fojon pripensis tiun ĉi vojaĝon, ke ni devos ĝin provi. Sed vojo agrabla ĝi ne estas, kaj mi ne parolis antaŭe pri ĝi al la Kunularo. Aragorno kontraŭis ĝin, almenaŭ ĝis la monta transpasejo estus entreprenita.

— Se temas pri vojo pli malagrabla ol la Ruĝkorna Pordo, ĝi ja devas esti vere misa, — diris Gaja. — Sed prefere rakontu al ni pri ĝi, por ke ni senprokraste sciu la plej malbonan.

— La vojo, pri kiu mi parolas, kondukas al la Minejoj de Morio, — diris

Gandalfo. Nur Gimlio levis la kapon; en liaj okuloj ekbrulis arda fajro. Ĉiuj aliaj ektimis pro la mencio de tiu nomo. Eĉ inter la hobitoj ĝi estis legendo de svaga timo.

— La vojo eble kondukas al Morio, sed kial ni esperu, ke ĝi kondukos tra Morio? — diris Aragorno pesimisme.

— Ĝi estas nomo malbonaŭgura, — diris Boromiro. — Cetere mi konstatas neniun neceson iri tien. Se ni ne povos transiri la montojn, ni vojaĝu suden, ĝis ni alvenos la Breĉon de Rohano, kie la homoj rilatas amikece al mia popolo, kaj ni sekvu la vojon, kiun mi iris survoje ĉi tien. Aŭ ni povus preterpasi kaj transiri Isenon en Longstrandon kaj Lebeninon, kaj tiel alveni Gondoron el la regionoj marproksimaj.

— Aferoj ŝanĝiĝis post kiam vi venis norden, Boromiro, — respondis Gandalfo. — Ĉu vi ne aŭdis tion, kion mi sciigis al vi pri Sarumano? Kun tiu mi eble okupiĝos antaŭ ol ĉio finiĝos. Sed la Ringo devas ne proksimiĝi al Isengardo, se malhelpi tion iel eblos. La Breĉo de Rohano estas fermita kontraŭ ni dum ni vojaĝas kun la Portanto.

» Koncerne la pli longan vojon: necesan tempon ni ne disponas. Ni povus pasigi unu jaron per tia vojaĝo, kaj ni trapasus multajn landojn, kiuj estas malplenaj kaj senazilaj. Tamen ili ne estas sendanĝeraj. La atentemaj okuloj de Sarumano kaj de la Malamiko observas ilin. Kiam vi venis norden, Boromiro, vi estis laŭ la okuloj de l' Malamiko nur hazarda vagulo el la Sudo kaj malmulte lia koncernaĵo: lian menson okupis persekutado de l' Ringo. Sed nun vi revenas kiel membro de l' Kunularo de la Ringo, kaj vin minacas danĝero dum via tuta restado kun ni. Tiu danĝero pliiĝos je ĉiu mejlo, kiun ni trapasos irante suden sub la nuda ĉielo.

» Depost nia aperta provo pri la montara pasejo nia sorto iĝis streĉa, mi timas. Mi jam konstatas malmulte da espero, se ni ne baldaŭ malaperos dum kelka tempo kaj kovros nian spuron. Sekve mi konsilas, ke ni iru nek tra la montoj, nek ĉirkaŭ ili, sed sub ili. Tio estas ĉiuokaze vojo, kiun la Malamiko malplej atendos.

— Ni ne scias, kion li atendas, — diris Boromiro. — Li eble vaĉos ĉiujn vojojn, ĉu probablajn, ĉu neprobablajn. Tiuokaze eniro al Morio signifus marŝi en kaptilon, apenaŭ preferinda al frapado sur la pordo de l' Malluma Turo mem. La nomo de Morio estas nigra.

— Vi priparolas tion, kion vi ne konas, similigante Morion al la fortikaĵo de Saŭrono, — respondis Gandalfo. — El ni nur mi iam estis en la karcero de l' Malhela Mastro, kaj nur en ties pli malnova kaj malpli fortika loĝejo en Dol Gulduro. Tiuj, kiuj trapasas la pordon de Baraduro, ne revenas. Sed mi ne kondukus vin en Morion, se mankus espero reeliri. Se troviĝas tie orkoj, eble pruviĝos mise por ni, estas ja vere. Sed la plimultaj

orkoj de la Nebulecaj Montoj estis dispelitaj aŭ detruitaj en la Batalo de l' Kvin Armeoj. La agloj raportas, ke orkoj denove kuniĝas de malproksime; sed ekzistas espero, ke Morio estas ankoraŭ libera. Ekzistas eĉ ebleco, ke tie estas gnomoj, kaj ke en iu profunda halo de siaj prapatroj eble troviĝas Balino filo de Fundino. Kiel ajn elfalos, necesas treti la vojon, kiun bezono elektas!

— Mi tretos kun vi tiun vojon, Gandalfo! — diris Gimlio. — Mi iros rigardi la halojn de Durino, kio ajn tie atendas — se vi povos trovi la pordon, kiu estas fermita.

— Bone, Gimlio! — diris Gandalfo. — Vi kuraĝigas min. Ni serĉos kune la kaŝitan pordon. Kaj ni trapasos. En la ruinoj de l' gnomoj, gnoma kapo estos malpli facile konfuzebla ol la elfaj aŭ homaj aŭ hobitaj. Tamen ne estos mia unua fojo en Morio. Mi longe serĉadis tie Trainon filon de Troro, post kiam li perdiĝis. Mi trapasis, kaj mi revenis viva!

— Ankaŭ mi unu fojon trapasis la Dimrilan Pordon, — diris Aragorno kviete; — sed kvankam ankaŭ mi reeliris, tiu memoro estas tre misa. Mi ne volas eniri Morion la duan fojon.

— Kaj mi ne volas eniri tien la unuan fojon, — diris Grinĉjo.

— Ankaŭ mi ne, — murmuris Sam.

— Kompreneble ne! — diris Gandalfo. — Kiu volas tion? Sed la demando estas: kiuj sekvos min, se mi kondukos vin tien?

— Mi, — diris Gimlio entuziasme.

— Mi, — diris Aragorno peze. — Vi sekvis mian kondukadon preskaŭ ĝis katastrofo en la neĝo, kaj diris ĝis nun neniun vorton kulpigan. Mi sekvos vian kondukadon, se jena lasta averto ne forturnos vin. Ne pri la Ringo, nek pri ni aliaj mi pensas nun, sed pri vi, Gandalfo. Kaj mi diras al vi: se vi trapasos la pordon de Morio, gardu vin.

— Mi *ne* iros, — diris Boromiro, — krom se la voĉdono de l' tuta Kunularo kontraŭas min. Kion diras Legolaso kaj la etuloj? Certe la voĉo de l' Ringoportanto devus aŭdiĝi?

— Mi ne volas iri al Morio, — diris Legolaso.

La hobitoj diris nenion. Sam rigardis al Frodo. Finfine Frodo ekparolis.

— Mi ne volas iri, — li diris, — sed mi ankaŭ ne volas rifuzi la konsilon de Gandalfo. Mi petas, ke ne okazu voĉdonado, ĝis ni estos dormintaj antaŭ la demando. Gandalfo pli facile ricevos voĉojn en la matena lumo ol en tiu ĉi frida malhelo. Kiel la vento hurlas!

Post tiuj vortoj ĉiuj silentiĝis penseme. Ili aŭdis sibladon de la vento inter la rokoj kaj arboj, kaj ĉirkaŭis ilin hurlado kaj ululado en la malplenaj noktospacoj.

Subite Aragorno saltleviĝis.

— Kiel la vento hurlas! — li kriis. — Tio estas hurlado de lupoj. La vargoj jam venis okcidenten de l’ Montoj!

— Ĉu do necesas atendi ĝis la mateno? — diris Gandalfo. — Statas, kiel mi ja diris. La persekutado komenciĝis! Eĉ se ni ĝisvivos la aŭroron, kiu nun deziros vojaĝi suden dum la nokto persekutate de l’ sovaĝaj lupoj?

— Kiom malproksima estas Morio? — demandis Boromiro.

— Estis pordo sud-okcidente de Karadraso, proksimume dek kvin mejlojn laŭ birda flugo, eble dudek laŭ lupokuro, — respondis Gandalfo pezkore.

— Do ni ekiru tuj post ekheliĝo morgaŭ, se ni povos, — diris Boromiro. — Lupo aŭdebla pli malbonas ol orko tenebra.

— Vere! — diris Aragorno, malstriktigante sian glavon en ties ingo. — Sed kie vargo ululas, tie ankaŭ orko cirkulas.

— Se nur mi akceptus la konsilon de Elrondo, — murmuris Grinĉjo al Sam. — Mi ne taŭgas finfine. Ne sufiĉas en mi la sango de Bandobraso la Bovblekulo: tiuj ululoj frostigas al mi la sangon. Mi ne memoras iam senti min tiel mizera.

— Mia koro lokiĝas en miaj piedfingroj, s-ro Grinĉjo, — diris Sam. — Sed ni ankoraŭ ne estas manĝitaj, kaj kun ni estas kelkaj bravuloj. Kio ajn atendas maljunan Gandalfon, mi vetas, ke tio ne estas lupa stomako.

Por defendi sin dumnokte la Kunularo grimpis ĝis la supro de l’ monteto sub kiu ili estis ŝirmintaj sin. Ĝin kronis nodaĵo da maljunaj torditaj arboj, ĉirkaŭ kiu kuŝis rompita cirklo da ŝtonegoj. Meze de tiu ili bruligis fajron, ĉar ne ekzistis espero, ke mallumo kaj silento gardos ilian spuron de eltrovo de l’ ĉasantaj bestaroj.

Ĉirkaŭ la fajro ili eksidis, kaj tiuj, kiuj ne gardostaris, dormetis malserene. La kompatinda poneo Vilĉjo tremis kaj ŝvitis, kie ĝi staris. La hurlado de l’ lupoj jam tute ĉirkaŭis ilin, foje pli foje malpli proksime. En la noktoprofundo multaj brilaj okuloj videblis rigardantaj ĉirkaŭ la monteto. Iuj venis preskaŭ ĝis la ŝtoncirklo. Ĉe breĉo en la cirklo estis videbla malhela lupfiguro, kiu fikse rigardis ilin. Ĝi eligis treman hurlon, kvazaŭ ĝi estus kapitano alvokante sian roton por ataki.

Gandalfo stariĝis kaj paŝis antaŭen, tenante alte sian bastonon.

— Aŭskultu, lupo de Saŭrono! — li kriis. — Jen estas Gandalfo. Fuĝu, se valoras al vi via fihaŭto! Mi ŝrumpigos vin de l’ vosto ĝis la muzelo, se vi envenos tiun ĉi ringon.

La lupo murmuregis kaj per granda salto direktiĝis al ili. Tiumomente aŭdiĝis akra kordsonoro. Legolaso estis arkpafinta. Laŭtiĝis malbelega kriaĉo, kaj la saltanta figuro klakfalis sur la teron; la elfa sago trapikis ĝian gorĝon. La vaĉaj okuloj subite estingiĝis. Gandalfo kaj Aragorno paŝis

antaŭen, sed la monteto estis senvivula; la ĉasantoj fuĝis. Ĉie ĉirkaŭe la mallumo silentiĝis, kaj neniu hurlado aŭdiĝis en la susura vento.

La nokto estis maljuna, kaj okcidente la malkreska luno subiradis, ekbrilante sporade tra la diseriĝantaj nuboj. Subite Frodo ekmoviĝe vekiĝis. Senaverte eksonis atakeme kaj sovaĝe ĉirkaŭ la kampo ŝtorma hurlado. Granda aro da vargoj estis kuniĝinta silente kaj nun atakis ilin de ĉiuj flankoj samtempe.

— Ĵetu hejtaĵon sur la fajron! — kriis Gandalfo al la hobitoj. — Elingigu viajn klingojn, kaj staru dorsaldorse!

En la saltanta lumo, kiam la freŝa ligno ekbrulis, Frodo ekvidis multajn grizajn figurojn transsalti la ŝtonringon. Pli kaj pli da ili sekvis. Tra la gorĝo de unu grandega unueveninto Aragorno pikpuŝis sian glavon; per larĝa svingo Boromiro senkapigis alian. Apud ili staris Gimlio sur la fortikaj kruroj disigitaj, svingante sian gnoman hakilon. La pafarko de Legolaso kantadis.

En la flagranta fajrolumo Gandalfo ŝajnis subite kreski: li altiĝis, granda minaca figuro kiel monumento de iu antikva reĝo el ŝtono starigita sur monto. Kliniĝante kvazaŭ nubo, li levis brulantan branĉon kaj paŝis renkonte al la lupoj. Ili retretis antaŭ li. Alten en la aeron li ĵetis la flamantan torĉon. Ĝi plibriliĝis per subita blanka radiado kiel fulmo; kaj lia voĉo ruliĝis tondre.

— *Naur an edraith ammen! Naur dan i ngaurhoth*! — li kriis. Ekestis muĝo kaj krakado, kaj la arbo super li ekhavis foliojn kaj florojn de blindigaj flamoj. La fajro saltis de arbosupro al arbosupro, La tuta montoflanko estis kronita per flagranta lumo. La glavoj kaj tranĉiloj de l' defendantoj ekbrilis kaj flagris. La lasta sago de Legolaso ekbrulis en la aero dumfluge, kaj plonĝis brulante en la koron de granda lupestro. Ĉiuj aliaj fuĝis.

Malrapide la fajro formortis ĝis restis neniom krom falantaj cindroj kaj flagretoj; amara fumo spiralis super la bruligitaj arbostumpoj kaj forbloviĝis malhele de la monteto, dum la unua lumo de aŭroro aperis malhele sur la ĉielo. Iliaj malamikoj estis dispelitaj kaj ne revenis.

— Ĉu mi ne diris al vi, s-ro Grinĉjo? — diris Sam, eningante sian glavon. — Lupoj ne havos lin. Tio estis miriga, tute sendube! Preskaŭ forbrulis la haroj de sur mia kapo!

Kiam venis plena lumo de l' mateno, troveblis neniuj postsignoj de la lupoj, kaj ili vane serĉis la kadavrojn de l' mortintoj. Neniu postsigno de la batalo restis krom la fumnigraj arboj kaj la sagoj de Legolaso kuŝantaj sur la monteto. Ĉiuj estis nedifektitaj krom unu, kies sola postlasaĵo estis la pinto.

— Estis, kiel mi antaŭtimis, — diris Gandalfo. — Tiuj ne estis lupoj

ordinaraj serĉantaj nutraĵon en la sovaĝejo. Ni manĝu rapide kaj foriru!

Tiun tagon la vetero ŝanĝiĝis denove, preskaŭ kvazaŭ ĝi estus regata de iu potenco, kiu ne plu bezonis neĝon, de kiam ili retretis de la pasejo, potenco, kiu nun volis havi klaran lumon, per kiu moviĝantoj en la sovaĝejo estus videblaj de malproksime. La vento turniĝadis dum la nokto de l' nordo al nord-okcidento, kaj nun ĝi forvelkis. La nuboj malaperis suden kaj la ĉielo remalfermiĝis, alta kaj blua. Kiam ili staris sur la montetoflanko, pretaj ekiri, pala sunlumo ekbrilis super la montopintoj.

— Ni devas atingi la pordon antaŭ la sunsubiro, — diris Gandalfo, — aŭ mi timas, ke ni tute ne atingos ĝin. Ne estas malproksime, sed nia vojo eble serpentumos, ĉar ĉi tie Aragorno ne povas gvidi nin; li malofte tramarŝis tiun ĉi regionon, kaj nur unu fojon mi estis sub la okcidenta muro de Morio, kaj tio okazis antaŭlonge.

» Tie ĝi troviĝas, — li diris, indikante foren sud-oriente, kie la flankoj de la montoj descendis apike en la ombrojn de siaj suboj. En la malproksimo estis malprecize videbla vico da nudaj klifoj, kaj meze de ili, pli alta ol la ceteraj, granda griza muro. — Kiam ni forlasis la pasejon mi kondukis vin suden, sed ne reen al nia elirpunkto, kiel eble rimarkis iuj el vi. Estas bone, ke mi tion faris, ĉar nun ni transiris malpli multajn mejlojn, kaj rapido necesas. Ni ekiru!

— Mi ne scias, kion ni esperu, — diris Boromiro malkontente, — ĉu ke Gandalfo trovos tion, kion li serĉas, aŭ ke alveninte la klifon ni trovos, ke la pordo estas por ĉiam perdita. Ĉiuj eblecoj ŝajnas malbonaj, kaj plej probable ŝajnas, ke ni estos trafitaj inter lupoj kaj la muro. Konduku antaŭen!

Gimlio nun marŝis antaŭe apud la sorĉisto, ĉar li tiel entuziasme volis alveni Morion. Kune ili gvidis la Kunularon reen al la montoj. La sola pravojo al Morio el okcidento estis kondukinta laŭ la fluejo de rivereto, Siranono, kiu elfluis de la klifosuboj proksime al la loko, kie staris la pordo. Sed aŭ Gandalfo erarvojis, aŭ la tereno ŝanĝiĝis dum la lastaj jaroj; ĉar li ne trovis la rivereton tie, kie li atendis trovi ĝin, nur kelkajn mejlojn sude de la elirpunkto.

La mateno proksimiĝis al tagmezo, kaj ankoraŭ la Kunularo vagis kaj baraktis en dezerta tereno el ruĝaj ŝtonoj. Nenie ili povis vidi ekbrilon de akvo aŭ aŭdi ties sonon. Ĉio estis sterila kaj seka. Iliaj koroj peziĝis. Ili vidis neniun vivantaĵon, kaj sur la ĉielo estis neniu birdo; sed kion alportos la nokto, se ĝi trafos ilin en tiu perditejo, neniu el ili volis pripensi.

Subite Gimlio, kiu iom urĝis antaŭe, alvokis ilin. Li staris sur teramaseto, indikante dekstren. Alrapidinte ili vidis sube profundan kaj mallarĝan kanalon. Ĝi estis malplena kaj silenta, kaj apenaŭ flueto de akvo moviĝis inter la brunaj kaj ruĝmakulitaj ŝtonoj de ĝia fundo; sed je la

proksima bordo estis pado, multe rompita kaj kaduka, kiu serpentumis inter la ruiniĝintaj muroj kaj pavimŝtonoj de antikva ĉefvojo.

— Ha! Jen ĝi finfine! — diris Gandalfo. — Tie ĉi kuradis la fluo Siranono, la Pordo-rojo, kiel oni kutimis nomi ĝin. Sed kio okazis al la akvo, mi ne povas konjekti; ĝi antaŭe estis rapida kaj brua. Venu! Ni devas plurapidi. Ni malfruiĝas.

La Kunularo estis dolorpieda kaj laca; sed ili marŝis obstine laŭ la kruda serpentuma pado tra multaj mejloj. La suno pasis la zeniton kaj komencis okcidentiri. Post mallonga halto kaj rapida manĝo ili pluiris denove. Antaŭ ili la montoj minacis, sed ilia pado kuŝis en profunda terkavo kaj ili povis vidi nur la pli altajn ŝultrojn kaj la fore orientajn pintojn.

Fine ili alvenis abruptan kurbon. Tie la vojo, kiu estis devajnta suden inter la rando de l' kanalo kaj apika forfalo de la tero maldekstre, turniĝis kaj denove kondukis rekte orienten. Ĉirkaŭirinte la angulon, ili vidis antaŭ si malaltan klifon, proksimume tridekfutan, kun supro rompita kaj zigzaga. Trans ĝin gutetis akvoflueto, tra larĝa fendaĵo, kiu ŝajnis elĉizita de akvofalo iam forta kaj plena.

— Efektive ŝanĝiĝis la loko! — diris Gandalfo. — Sed ne eblas erari pri ĝi. Jen sola restaĵo de la Ŝtupara Akvofalo. Se mi ĝuste memoras, ekzistis ŝtuparo tranĉita el la rokoj apud tiu, sed la ĉefa vojo forkurbiĝis maldekstren kaj grimpis per pluraj rondiroj ĝis la ebena tero supre. Antaŭe estis malprofunda valo post la akvofalo rekte ĝis la Muroj de Morio, kaj la Siranono trafluis ĝin kun la pado apude. Ni iru vidi, kia estas nun la situacio!

Ili trovis la ŝtonajn ŝtupojn sen malfaciloj, kaj Gimlio suprenkuris ilin rapide, sekvate de Gandalfo kaj Frodo. Kiam ili alvenis la supron ili vidis, ke ili ne povos pluiri laŭ tiu vojo, kaj la kialo de sekiĝo de l' Pordo-rojo riveliĝis. Malantaŭ ili la subiranta Suno plenigis la friskan okcidentan ĉielon per ekbrilanta oro. Antaŭ ili etendiĝis malhela senmova lago. Nek ĉielo nek sunsubiro speguliĝis sur ĝia morna supraĵo. Siranono estis digita kaj plenigis la tutan valon. Trans la malbonaŭgura akvo baŭmis larĝaj klifoj, kies severaj fruntoj palis en la velka lumo: definitivaj kaj nepaseblaj. Neniun indikon pri pordo aŭ enirejo, nek fendeton aŭ splitiĝon Frodo povis vidi sur la minaca ŝtono.

— Jen estas la Muroj de Morio, — diris Gandalfo, fingromontrante trans la akvon. — Kaj tie iam staris la Pordo, la elfa Pordo fine de la vojo el Holino, laŭ kiu ni alvenis. Sed tiu ĉi vojo estas barita. Neniu el la Kunularo volos tranaĝi tiun mornan akvon je la tagofino, mi supozas. Ĝi aspektas misefika.

— Ni devas trovi vojon ĉirkaŭ la nordan randon, — diris Gimlio. — La

unua farotaĵo de l’ Kunularo estas suprengrimpi per la ĉefa pado kaj vidi, kien tiu kondukos nin. Eĉ se lago ne ekzistus, ni ne povus suprenigi nian ŝarĝponeon per tiu ĉi ŝtuparo.

— Sed ĉiuokaze ni ne povos kunirigi la kompatindan beston en la Minejojn, — diris Gandalfo. — La vojo sub la montoj estas vojo malluma, kaj troviĝas lokoj tiel mallarĝaj kaj apikaj, ke ĝi ne povos tie treti, eĉ se ni povos.

— Povra Vilĉjo! — diris Frodo. — Mi ne antaŭvidis tion. Kaj povra Sam! Mi scivolas, kion li diros?

— Mi bedaŭras, — diris Gandalfo. — Kompatinda Vilĉjo estas utila kunulo, kaj dolorigas mian koron lasi ĝin. Mi preferus vojaĝi malpli ŝarĝite kaj kunportus neniun beston, precipe ne tiun, kiun Sam amas, se mi akceptigus mian deziron. Mi timis la tutan tempon, ke ni estos devigataj sekvi tiun ĉi vojon.

La tago proksimiĝis al sia fino, kaj malvarmaj steloj ekbrilis sur la ĉielo alte super la sunsubiro, kiam la Kunularo, laŭeble rapide, grimpis la deklivojn kaj alvenis la bordon de l’ lago. Larĝe ĝi ŝajnis ne pli ol dudek aŭ tridek paŝojn en la plej larĝa loko. Kiom ĝi foretendiĝis suden ili ne povis vidi per la velkanta lumo; sed ĝia norda fino troviĝis ne pli ol duonmejlon de ilia starpunkto, kaj inter la ŝtonplenaj firstoj, kiuj ĉirkaŭis la valon, kaj la rando de l’ akvo estis eĝo de aperta tero. Ili rapidis antaŭen, ĉar ili devis trairi unu-du mejlojn antaŭ ol atingi la lokon sur la kontraŭa bordo, al kiu Gandalfo celis; kaj poste li ankoraŭ devis trovi la pordon.

Kiam ili alvenis la plej nordan angulon de la lago, ili trovis mallarĝan golfeton, kiu baris ilian vojon. Ĝi estis verda kaj stagna, elpuŝita kvazaŭ ŝlima brako al la enfermantaj montetoj. Gimlio paŝis antaŭen netimigite, kaj trovis, ke la akvo estas malprofunda, ne pli ol ĝismaleola ĉe la rando. Malantaŭ li ili marŝis spalire, zorge trovante sian vojon, ĉar sub la loloplenaj flakoj estis ŝtonoj glitigaj kaj grasaj, kaj surpaŝado estis perfidema. Frodo ektremis pro abomeno je tuŝo de l’ malhela malpura akvo sur la piedoj.

Dum Sam, lasta el la Kunularo, kondukis Vilĉjon supren al la seka tero je la kontraŭa flanko, aŭdiĝis mallaŭta sono: siblo sekvata de plaŭdo, kvazaŭ fiŝo perturbus la senmovan supraĵon de la akvo. Rapide turninte sin, ili vidis ondetojn, ombre nigrarandajn en la velka lumo: grandaj ringoj etendiĝis foren de punkto malproksime sur la lago. Aŭdiĝis bobela sono, kaj sekvis silento. La krepusko profundiĝis, kaj la lastajn radiojn de la sunsubiro vualis nuboj.

Gandalfo nun iris rapidege, kaj la aliaj sekvis laŭeble rapide. Ili atingis la strion de seka tero inter la lago kaj la klifoj: ĝi estis mallarĝa, ofte malpli

ol dekpaŝa, kaj ŝarĝita de falintaj rokoj kaj ŝtonoj; sed ili trovis vojon, premante sin al la klifo, forrestante de la malhela akvo laŭpove. Unu mejlon sude laŭ la bordo ili alvenis ileksarbustojn. Stumpoj kaj mortaj branĉoj putris en la malprofunda akvo, verŝajne restaĵo de iamaj densejoj, aŭ de dornarbaro, kiu iam randis la vojon trans la dronintan valon. Sed proksime sub la klifo staris, ankoraŭ fortaj kaj vivantaj, du altaj arboj, pli grandaj ol iuj ajn ileksoj iam viditaj aŭ imagitaj de Frodo. Iliaj radikegoj disvastiĝis de la muro ĝis la akvo. Sub la baŭmaj klifoj ili aspektis nuraj arbustoj, kiam vidataj en la malproksimo de l' supro de l' ŝtuparo; sed nun ili etendiĝis super la kapoj, rigidaj, malhelaj kaj silentaj, kreante profundajn noktombrojn ĉirkaŭ siaj suboj, starante kiel sentinelaj pilastroj je la fino de la vojo.

— Nu, jen ni estas finfine! — diris Gandalfo. — Ĉi tie finiĝis la elfa vojo el Holino. Ilekso estas blazono de l' popolo de tiu lando, kaj ili plantis ĝin ĉi tie por signi la limon de sia regno; ĉar la Okcidenta pordo estis farita ĉefe por ilia uzado dum ilia intertraktado kun Morio. Tiuj estis tagoj pli feliĉaj, kiam ankoraŭ ekzistis foje proksima amikeco inter personoj diversrasaj, eĉ inter gnomoj kaj elfoj.

— Ne kulpis la gnomoj, ke la amikeco velkis, — diris Gimlio.

— Mi ne aŭdis, ke kulpis la elfoj, — diris Legolaso.

— Mi aŭdis pri ambaŭ, — diris Gandalfo; — kaj mi ne juĝesprimos nun. Sed mi petegas, ke almenaŭ vi, Legolaso kaj Gimlio, estu amikoj, kaj helpu min. Mi bezonas vin ambaŭ. La pordo estas fermita kaj kaŝita, kaj ju pli baldaŭ ni trovos ĝin, des pli bone. Nokto proksimiĝas!

Turninte sin al la aliaj, li diris:

— Dum mi serĉos, bonvolu prepari vin por eniri la Minejojn. Ĉar ĉi tie bedaŭrinde ni devas adiaŭi nian bravan ŝarĝbeston. Vi devas flankenmeti multajn aĵojn, kiujn ni kunportis kontraŭ malfavora vetero: tion vi ne bezonos interne, nek, espereble, kiam ni trapasos kaj pluvojaĝos suden. Anstataŭe, ĉiu el ni devos porti parton de tio, kion la poneo portis, precipe manĝaĵon kaj la akvujojn.

— Sed vi ne povas forlasi kompatindan Vilĉjon en tiu ĉi senespera loko, s-ro Gandalfo! — kriis Sam, kolera kaj ĉagrenita. — Tion mi ne akceptos, kaj jen vi havas. Kiam ĝi estas veninta tiel malproksimen kaj tiel plu!

— Mi bedaŭras, Sam, — diris la sorĉisto. — Sed kiam la Pordo malfermiĝos, laŭ mia opinio vi ne povos treni internen vian Vilĉjon, en la longan mallumon de Morio. Vi devos elekti inter Vilĉjo kaj via mastro.

— Li sekvus s-ron Frodo en kavernon de drako, se mi kondukus lin, — protestis Sam. — Estas ne malpli ol murde lin forsendi, kiam ĉirkaŭas ĉiuj tiuj lupoj.

— Estos multe malpli ol murde, mi esperas, — diris Gandalfo. Li metis sian manon sur la kapon de l' poneo, kaj parolis per mallaŭta voĉo. — Iru kun vortoj gardaj kaj gvidaj. Vi estas saĝa besto, kaj lernis multon en Rivendelo. Trovu vojon al lokoj, kie vi trovos herbon, kaj tiel venu al la domo de Elrondo, aŭ kien ajn vi volas iri.

» Jen, Sam! Li havos tute saman eblecon eskapi lupojn, kiel ni.

Sam staris malafable apud la poneo kaj redonis neniun respondon. Vilĉjo, ŝajne komprenante bone, kio okazas, premiĝis al li, metante sian nazon al la orelo de Sam. Sam ekploris, kaj fuŝmanipulis la rimenojn, forprenante ĉiujn pakaĵojn de la poneo kaj ĵetante ilin teren. La aliaj dispartigis la aĵojn, amasigante ĉion, kion oni povus postlasi, kaj dividante la ceteron.

Farinte tion, ili turniĝis por rigardi Gandalfon. Ŝajnis, kvazaŭ li farus nenion. Li staris inter la du arboj rigardante la sensignan muron de la klifo, kvazaŭ li traborus per la okuloj truon sur ĝi. Gimlio disvagis, frapante ie-tie la ŝtonon per sia hakilo. Legolaso estis premita al la roko, kvazaŭ aŭskultante.

— Nu, jen ni estas tute pretaj, — diris Gaja; — sed kie estas la pordo? Mi vidis neniun indikon pri ĝi.

— Gnomaj pordoj ne estas faritaj por esti videblaj kiam fermitaj, — diris Gimlio. — Ili estas nevideblaj, kaj iliaj propraj mastroj ne povas ilin trovi aŭ malfermi, se ilia sekreto estas forgesita.

— Sed tiu ĉi Pordo ne estis farita por esti sekreto konata nur al gnomoj, — diris Gandalfo, subite ekvigliĝante kaj sin returninte. — Krom se ĉio tute ŝanĝiĝis, okuloj, kiuj scias kion serĉi, povas malkovri la signojn.

Li marŝis antaŭen al la muro. Ĝuste inter la ombroj de la arboj estis glata spaco, kaj trans tiu li pasigis tien-reen siajn manojn, murmurante subvoĉe vortojn. Poste li retropaŝis.

— Rigardu! — li diris. — Ĉu vi jam vidas ion?

La luno nun brilis sur la grizan rokvizaĝon; sed dum kelka tempo ili povis vidi nenion alian. Poste malrapide sur la surfaco, kie pasis la manoj de l' sorĉisto, aperis malklaraj linioj, kiel sveltaj vejnoj da arĝento etendiĝantaj en la ŝtono. Unue ili ne estis pli ol palaj filandraĵoj, tiel fajnaj, ke ili nur ekbrilis sporade, kie la Luno trafis ilin, sed grade ili plilarĝiĝis kaj pliklariĝis, ĝis la desegnon oni povis diveni.

Ĉe la supro, tiel alte kiel Gandalfo povis atingi, estis arkaĵo de interplektitaj literoj de la elfa skribmaniero. Sube, kvankam la fadenoj estis diversloke malklaraj aŭ rompitaj, estis videblaj konturoj de amboso kaj martelo, super Muj estis krono kun sep steloj. Sube de tiuj estis du arboj, portante po krescentan lunon. Pli klare ol ĉiuj ĉi forte brilis meze de la

pordo unuopa stelo kun multaj radioj.

— Tiuj estas la emblemoj de Durino! — kriis Gimlio.

— Kaj jen la Arbo de l' Altaj Elfoj! — diris Legolaso.

— Kaj la Stelo de l' Domo de Feanoro, — diris Gandalfo. — Ili estas kreitaj el *ithildin*, kiu spegulas nur stellumon kaj lunlumon, kaj dormas ĝis ĝi estas tuŝita de iu, kiu elparolas vortojn jam delonge forgesitajn en Mez-Tero. Pasis longa tempo, de kiam mi aŭdis ilin, kaj mi pensis profunde antaŭ ol mi povis revoki ilin en mian menson.



— Kion diras la skribaĵo? — demandis Frodo, kiu provis deĉifri la surskribon sur la arkaĵo. — Mi supozis, ke mi konas la elfajn literojn, sed tiujn mi ne scias legi.

— La vortoj estas laŭ la elf-lingvo de la Okcidento de Mez-Tero dum la Praaj Tagoj, — respondis Gandalfo. — Sed ili diras nenion gravan al ni. Ili diras nur: *La Pordoj de Durino, Mastro de Morio. Parolu, amiko, kaj eniru*. Kaj sube estas skribita ete kaj malforte: *Mi, Narvio, faris ilin, Celebrimboro de Holino desegnis tiujn ĉi signojn*.

— Kion ĝi celas per *parolu, amiko, kaj eniru*? — demandis Gaja.

— Tio estas sufiĉe klara, — diris Gimlio. — Se vi estas amiko, diru la pasvorton, kaj la pordo malfermiĝos, kaj vi povos eniri.

— Jes, — diris Gandalfo, — tiu pordo estas probable regata per vortoj. Iuj gnomaj pordoj malfermiĝas nur je specialaj horoj, kaj por apartaj personoj; kaj iuj havas serurojn kaj ŝlosilojn, kiuj estas tamen bezonataj, kiam ĉiuj necesaj horoj kaj vortoj estas konataj. Tiu ĉi pordo havas neniun ŝlosilon. Dum la tagoj de Durino ĝi ne estis sekreta. Ĝi kutime staris malfermita kaj pordogardantoj sidis ĉi tie. Sed se ili estis malfermitaj, ĉiu kiu konis la malferman vorton povis ĝin diri kaj trapasi. Almenaŭ, tiel estas registrite, ĉu ne, Gimlio?

— Estas, — diris la gnomo. — Sed kia estis la vorto, tio ne estas rememorata. Narvio kaj lia metieco kaj ĉiuj liaj similuloj malaperis de la tero.

— Sed ĉu ne *vi* konas la vorton, Gandalfo? — demandis Boromiro surprizite.

— Ne! — diris la sorĉisto.

La aliaj aspektis konsternite; nur Aragorno, kiu bone konis Gandalfon, restis silenta kaj senperturba.

— Do kiom utilis treni nin al tiu ĉi malbenita loko? — kriis Boromiro, retrorigardante ektreme al la malhela akvo. — Vi diris al ni, ke vi iam trapasis la Minejojn. Kiel tio povis okazi, se vi ne sciis, kiel eniri?

— La respondo al via unua demando, Boromiro, — diris la sorĉisto, — estas ke la vorton mi ne konas — ĝis nun. Sed ni baldaŭ vidos. Kaj, — li aldonis, kun ekbrilo en l' okuloj sub la vilaj brovoj, — vi rajtos demandi, kiom utilas miaj faroj, kiam ili pruviĝos senutilaj. Rilate vian alian demandon: ĉu vi dubas mian rakonton? Aŭ ĉu restas al vi neniom da sagaco? Mi ne eniris laŭ tiu ĉi vojo. Mi alvenis el la oriento.

» Se vi volas scii, mi diros al vi, ke tiu ĉi pordo malfermiĝas elen. El interne oni povas ŝovmalfermi ĝin per la manoj. El ekstere nenio movos ĝin krom la ordona sorĉaĵo. Oni ne povas devigi malfermon enen.

— Kion vi intencas fari, do? — demandis Grinĉjo, netimigite de l' vilaj brovoj de la sorĉisto.

— Bati la pordon per via kapo, Peregrino Tjuko, — diris Gandalfo.

— Sed se tio ne frakasos ĝin, kaj al mi estos permesata iom da trankvilo sen stultaj demandoj, mi serĉos la malfermajn vortojn. Mi iam konis ĉiun sorĉaĵon en ĉiuj lingvoj de elfoj, homoj aŭ orkoj, kiujn oni iam ajn uzis tiucele. Mi povas ankoraŭ memori centon da ili sen fosado en mia menso. Sed nur kelkaj provoj, ŝajnas al mi, estos bezonataj; kaj mi ne devos peti Gimlion pri vortoj de l' sekreta gnom-lingvo, kiun ili instruas al neniu. La malfermaj vortoj estis elfaj, kiel la skribado sur la arkaĵo: tio ŝajnas certa.

Li denove alpaŝis la rokon, kaj tuŝis leĝere per sia bastono la arĝentan

stelon en la mezo sub la signo de l' amboso.

Annon edhellen, edro hi ammen!
Fennas nogothrim, lasto beth lammen!

li diris per komanda voĉo. La arĝentaj linioj velkis, sed la sensigna griza ŝtono ne moviĝis.

Multfoje li ripetis tiujn vortojn laŭ diversaj ordoj, aŭ variigis ilin. Poste li provis aliajn sorĉaĵojn, unu post alia, parolante jen pli rapide kaj pli laŭte, jen mallaŭte kaj malrapide. Poste li elparolis multajn unuopajn vortojn de la elfa lingvo. Nenio okazis. La klifo baŭmis en la nokton, la sennombraj steloj ekbrulis, la vento fride blovis, kaj la pordo restis senmova.

Denove Gandalfo aliris la muron, kaj levinte alte siajn brakojn li parolis laŭ tonoj de komando kaj koleriĝo.

— *Edro, edro*! — li kriis, kaj frapis la rokon per sia bastono. — *Malfermiĝu, malfermiĝu*! — li kriegis, kaj sekvis tion per la sama ordono en ĉiu lingvo iam ajn parolita en la Okcidento de Mez-Tero. Poste li ĵetis sian bastonon sur la teron, kaj sidiĝis silente.

Tiumomente de malproksime la vento alportis al iliaj aŭskultantaj oreloj hurladon de lupoj. Vilĉjo ektremis pro timo, kaj Sam saltis al ĝia flanko kaj fiustris mallaŭte al ĝi.

— Ne lasu ĝin forkuri! — diris Boromiro. — Ŝajnas al mi, ke ni ankoraŭ bezonos ĝin, se la lupoj nin ne trovos. Kiom mi malamegas tiun ĉi filagon! — Li klinis sin kaj preninte ŝtonegon ĵetis ĝin en la malhelan akvon.

La ŝtono malaperis kun softa frapo; sammomente okazis viŝo kaj bobelo. Grandaj ondiĝantaj ringoj formiĝis sur la surfaco ĉirkaŭ la loko, kie falis la ŝtono, kaj tiuj moviĝis malrapide al la subo de l' klifo.

— Kial vi faris tion, Boromiro? — diris Frodo. — Ankaŭ mi malamegas tiun ĉi lokon, kaj mi timas. Mi ne scias pro kio: ne lupoj, nek la mallumo malantaŭ la pordo, sed io alia. Mi timas la lagon. Ne perturbu ĝin!

— Se nur ni povus foriri! — diris Gaja.

— Kial Gandalfo ne faras ion rapide? — diris Grinĉjo. Gandalfo malatentis ilin. Li sidis kun klinita kapo, aŭ malespere aŭ zorge penseme. La morna hurlado de l' lupoj aŭdiĝis denove. La ondiĝoj sur la akvo kreskis kaj pliproksimiĝis; iuj jam lekis la bordon. Kun subito, kiu timigis ilin ĉiujn, la sorĉisto saltstariĝis. Li estis ridanta.

— Jen mi havas! — li kriis. — Kompreneble, kompreneble! Absurde simpla, kiel la plimultaj enigmoj, kiam vi trovas la respondon.

Enmaniginte sian bastonon, li ekstaris antaŭ la roko kaj diris per klara voĉo:

— *Mellon*!

La stelo ekbrilis mallonge kaj denove velkis. Poste, silente, granda pordo konturiĝis, kvankam nek fendeto nek kunmeto estis videbla pli frue. Malrapide ĝi disiĝis meze kaj svingiĝis elen, colon post colo, ĝis ambaŭ klapoj apogiĝis al la muro. Tra la malfermaĵo estis videbla ombreca ŝtuparo, kiu supreniris apike; sed preter la unuaj ŝtupoj la mallumo pli profundis ol la nokto. La Kunularo rigardis mirigite.

— Mi malpravis finfine, — diris Gandalfo, — kaj ankaŭ Gimlio, Gaja, ĉu vi kredas, montris la ĝustan vojon. La malferma vorto estis skribita sur la arkaĵo la tutan tempon! La traduko devis esti: *Diru "Amiko" kaj eniru*. Mi devis nur elparoli la elfan vorton *amiko* kaj la pordo malfermiĝis. Tute simpla. Tro simpla por klera konmajstro dum tiuj ĉi suspektemaj tagoj. Tiuj estis tagoj pli feliĉaj. Nun ni ekiru!

Li paŝis antaŭen kaj metis piedon sur la unuan ŝtupon. Sed tiumomente okazis pluraj aferoj. Frodo sentis, ke io kaptas lian maleolon, kaj li falis kriante. Vilĉjo sovaĝe timhenis, turniĝis kaj forkuris laŭ la lagobordo en la mallumon. Sam saltis post ĝin, poste aŭdinte la krion de Frodo li rekuris, plorante kaj sakrante. La aliaj svinge turniĝis kaj vidis ŝaŭmi la akvon de l' lago, kvazaŭ serpentaro alnaĝus de la suda fino.

El la akvo longa sinua tentaklo estis rampinta; ĝi estis palverda, fosforeska kaj malseka. Ĝia fingrohava finaĵo kaptis la piedon de Frodo kaj trenis lin en la akvon. Sam surgenue nun hakis ĝin per tranĉilo.

La tentaklo rezignis pri Frodo, kaj Sam fortiris lin, vokante por helpo. Dudek aliaj tentakloj elvenis ondiĝe. La malhela akvo ŝaŭmis, kaj la aero haladzis.

— Tra la pordon! Supren laŭ la ŝtuparo! Rapide! — kriis Gandalfo retrosaltante. Instigante ilin forlasi la hororon, kiu ŝajnis enradikigi en la teron ĉiujn krom Sam, li pelis ilin antaŭen.

Nur ĝustatempe. Sam kaj Frodo supreniris nur unu-du ŝtupojn, kaj Gandalfo apenaŭ ekgrimpis, kiam la palpantaj tentakloj tordiĝe transis la mallarĝan bordon kaj ekpalpis la klifmuron kaj la pordon. Unu tordiĝis trans la sojlon rebrilante sub la stellumo. Gandalfo turniĝis kaj paŭzis. Se li pripensis, kiu vorto fermos denove la pordon de interne, tio ne necesis. Multaj volviĝantaj brakoj kaptis ambaŭflanke la pordoklapojn kaj per terura forto svingis ilin. Kun frakasa eĥo ili klakfermiĝis, kaj ĉia lumo estis perdita. Bruo de ŝirado kaj krakado aŭdiĝis obtuze tra la peza ŝtono.

Sam, kroĉiĝinte al la brako de Frodo, kolapsis sur ŝtupon en la nigra mallumo.

— Kompatinda Vilĉjo! — li diris per sufokiĝa voĉo. — Kompatinda Vilĉjo! Lupoj kaj serpentoj! Sed la serpentoj tro perturbis lin. Mi devis

elekti, s-ro Frodo. Vin mi devis akompani.

Ili aŭdis Gandalfon resubeniri la ŝtuparon kaj puŝi sian bastonon kontraŭ la pordon. Ekskuiĝis la ŝtono kaj la ŝtuparo tremis, sed la pordo ne malfermiĝis.

— Nu, nu! — diris la sorĉisto. — La pasejo estas barita jam malantaŭ ni, kaj restas nur unu elirejo — aliflanke de la montoj. Mi timas pro la bruo, ke ŝtonegoj estas amasigitaj, kaj la arboj elradikitaj, kaj ĵetitaj al la pordo. Mi bedaŭras, ĉar la arboj estis belaj, kaj staradis tiom longe.

— Mi sentis, ke proksimas io fia, ekde kiam mia piedo tuŝis la akvon, — diris Frodo. — Kio estis tiu aĵo, aŭ ĉu ili estis multaj?

— Mi ne scias, — respondis Gandalfo; — sed ĉiujn tentaklojn gvidis unuopa celo. Io rampis, aŭ estis elpelita el malhelaj akvoj sub la montoj. En la profundejoj de la mondo estas kreaĵoj pli praaj kaj pli fiaj ol orkoj!

Li ne voĉigis sian penson, ke kio ajn estis la lagloĝanto, ĝi kaptis Frodon unue el la tuta Kunularo.

Boromiro murmuris subvoĉe, sed la eĥanta ŝtono plialtigis la sonon al raŭka flustro aŭdebla de ĉiuj:

— En la profundejoj de la mondo! Kaj tien ni iras kontraŭ mia volo. Kiu kondukos nin nun en tiu ĉi mortiga mallumo?

— Mi, — diris Gandalfo, — kaj Gimlio marŝos kun mi. Sekvu mian bastonon!

Antaŭenirante laŭ la granda ŝtuparo, li tenis alte sian bastonon, kaj de ties pinto vidiĝis malbrila radiado. La larĝa ŝtuparo estis fortika kaj sendifekta. Ducent ŝtupojn ili kalkulis, larĝajn kaj malprofundajn; kaj ĉe la supro ili trovis arkaĵan koridoron kun ebena planko kondukantan antaŭen en la malhelon.

— Ni sidu por ripozi kaj ion manĝi, ĉi tie en la koridoro tial ke ni ne trovas manĝoĉambron! — diris Frodo. Li jam komencis forskui la timegon pro l' kroĉiĝinta brako, kaj subite li spertis ekstreman malsaton.

Ĉiuj bonvenigis la proponon; kaj ili sidiĝis sur la supraj ŝtupoj, malhelaj figuroj en la malhelo. Post la manĝo, Gandalfo donis al ĉiuj po trian gluteton de l' *miruvoro* de Rivendelo.

— Ne multe pli longe ĝi haveblos, mi timas, — li diris, — sed ŝajnas al mi, ke ni bezonas ĝin post tiu teruraĵo ĉe la pordo. Kaj krom se ni ege bonŝancos, ni bezonos la tutan restaĵon antaŭ ol ni vidos la alian flankon! Traktu zorge ankaŭ la akvon! Ekzistas en la Minejoj multaj rojoj kaj putoj, sed ili estas netuŝindaj. Ni eble ne havos okazon plenigi niajn ujojn kaj botelojn ĝis ni descendos en Dimrilan Valon.

— Kiom longe tio postulos? — demandis Frodo.

— Mi ne scias, — respondis Gandalfo. — Tio dependas de multaj

hazardoj. Sed rektire, sen akcidento aŭ vojperdo, ni bezonos tri aŭ kvar marŝadojn, mi konjektas. Ne povas temi pri malpli ol kvardek mejloj de la Okcidenta ĝis la Orienta pordo laŭ rekta linio, kaj la vojo eble serpentumos multe.

Post nur mallonga ripozo ili denove ekiris. Ĉiuj tre volis kompletigi la vojaĝon kiel eble plej rapide kaj volonte pretis, malgraŭ laco, daŭrigi la marŝadon dum pluraj horoj. Gandalfo marŝis la unua, kiel antaŭe. Per sia maldekstra mano li alte tenis sian glimantan bastonon, kies lumo montris nur la teron antaŭ liaj piedoj; per la dekstra li tenis sian glavon Glamdringo. Malantaŭ li marŝis Gimlio, kies okuloj ekbriletis pro l' malforta lumo dum li turnis sian kapon de flanko al flanko. Malantaŭ la gnomo marŝis Frodo, kaj li estis elingiginta la mallongan glavon Piko. Neniom ekbrilis la klingoj de Piko aŭ de Glamdringo; kaj tio estis iom konsola, ĉar estante faraĵoj de l' elfaj forĝistoj dum la Praaj Tagoj, tiuj glavoj brilis per malvarma lumo, se proksimis iuj orkoj. Malantaŭ Frodo iris Sam, poste Legolaso, la junaj hobitoj kaj Boromiro. En la mallumo malantaŭe, severa kaj silenta, marŝis Aragorno.

La koridoro plurfoje turniĝis kaj poste ekiris malsupren. Ĝi daŭre descendis dum longa tempo antaŭ ol ĝi denove niveliĝis. La aero iĝis varmega kaj sufoka, sed ĝi ne estis malpura, kaj kelkfoje ili sentis sur siaj vizaĝoj kurentojn da aero pli malvarmeta, eliranta el duone konstateblaj breĉoj en la muroj. Tiuj estis multaj. Per la pala radiado de l' bastono de la sorĉisto, Frodo ekvidetis ŝtuparojn, arkaĵojn kaj aliajn koridorojn kaj tunelojn, deklivantajn supren, apike subirajn aŭ malfermiĝantajn sensigne malhele je ambaŭ flankoj. Ĝi estis konfuza super ĉia memorebleco.

Gimlio malmulte helpis Gandalfon, krom per sia brava kuraĝo. Almenaŭ lin ne ĝenis, kiel la plimultajn aliajn, la simpla mallumo mem. Ofte la sorĉisto konsultis lin ĉe lokoj, kie la vojelekto estis dubinda, sed ĉiam Gandalfo havis la deeidan voĉon. La Minejoj de Morio estis grandaj kaj komplikaj super la imago de Gimlio, filo de Gloino, malgraŭ tio, ke li estis gnomo de l' monta gento. Al Gandalfo la svagaj memoroj pri vojaĝo antaŭlonge nun malmulte helpis, sed eĉ en la malhelo kaj malgraŭ ĉiuj serpentumoj de l' vojo li sciis, kien li volas iri, kaj li ne hezitis, se troviĝis pado kondukanta al lia celo.

— Ne timu! — diris Aragorno. Estis paŭzo pli longa ol kutime, kaj Gandalfo kaj Gimlio interflustradis; la aliaj amasiĝis malantaŭe, zorgoplene atendante. — Ne timu! Mi akompanis lin dum multaj vojaĝoj, eĉ se neniam sur vojo tiom malluma; kaj en Rivendelo estas rakontoj pri pli grandaj liaj faroj ol tiuj, kiujn mi ĉeestis. Li ne devios — se pado trovebla ekzistas. Li enkondukis nin ĉi tien spite al niaj timoj, sed li elkondukos nin denove,

kiom ajn tio kostos al li. Li pli certe trovas la vojon hejmen en blindiga nokto, ol la katoj de l' Reĝino Berutiela.

Estis feliĉe por la Kunularo, ke ĝi havis tian gvidanton. Mankis hejtaĵo kaj ebleco krei torĉojn, ĉar pro la frenezeca baraktado ĉe la pordo multaj aĵoj estis postlasitaj. Sed sen iu ajn lumo ili certe trafus malsukcesigojn. Ne nur troviĝis multaj vojoj elekteblaj, sed en multaj lokoj estis truoj kaj enfalejoj, kaj malhelaj putoj apudpade, pro kiuj iliaj pasantaj paŝoj reeĥis. Ekzistis fendaĵoj kaj abismetoj en la muroj kaj planko, kaj de tempo al tempo apertiĝis fendo antaŭ iliaj piedoj. La plej larĝa estis sepfuta, kaj longan tempon bezonis Grinĉjo antaŭ ol li ekhavis sufiĉe da kuraĝo por transsalti la timigan truon. Bruo de kirliĝanta akvo leviĝis de malproksima subo, kvazaŭ iu granda muelrado turniĝus en la profundo.

— Ŝnuro! — murmuris Sam. — Mi sciis, ke ĝi mankos al mi, se mi ne kunportas ĝin!

Ju pli oftiĝis tiuj danĝeroj, des malpli rapide ili marŝis. Jam ŝajnis, ke ili tretis pluen, pluen, senfine ĝis la radikoj de l' monto. Ili estis pli ol lacaj, tamen ne havigis konsolon la penso pri halto ie. La spirito de Frodo fortiĝis dum kelka tempo post lia eskapo, kaj post manĝado kaj gluto de l' likvoro; sed nun trarampis en li sento de maltrankvilo kreskanta al timego. Kvankam li estis kuracita en Rivendelo post la tranĉilbato, tiu severa vundo ne estis sen postefiko. Liaj sentumoj estis pli akraj kaj pli konstatis aferojn nevideblajn. Unu indiko pri ŝanĝiĝo, kiun li baldaŭ rimarkis, estis, ke li kapablis pli multon vidi en la malhelo ol iu ajn el siaj kunuloj, eble escepte de Gandalfo. Kaj li estis ĉiuokaze portanto de la Ringo: ĝi pendis sur sia ĉeno sur lia brusto, kaj kelkfoje ŝajnis tre peza. Li sentis certecon de fio antaŭe kaj malantaŭe, sed li diris nenion. Li tenis pli firme la tenilon de sia glavo kaj persiste pluiris.

La Kunularb malantaŭ li malofte parolis, kaj tiam nur per hastaj flustroj. Aŭdiĝis neniu sono krom la sono de la propraj piedoj; obtuza stompo de l' gnomaj botoj de Gimlio; peza paŝado de Boromiro; leĝeraj paŝoj de Legolaso; mallaŭta apenaŭ aŭdebla frapetado de hobitaj piedoj; kaj en la malantaŭo la malrapidaj firmaj piedsonoj de Aragorno kun ties longa paŝo. Kiam ili haltis momente ili aŭdis tute nenion, krom foje okaza mallaŭta fluetado kaj gutado de nevidebla akvo. Tamen Frodo komencis aŭdi aŭ imagi, ke li aŭdas ion alian: similan al malforta sono de molaj nudaj piedoj. Ĝi neniam sufiĉe laŭtis aŭ proksimis, ke li estu certa, ke li aŭdas ĝin; sed komenciĝinte, ĝi neniam ĉesis, dum la Kunularo iradis. Sed ĝi ne estis eĥo, ĉar kiam ili haltis ĝi plu frapetadis sola, kaj poste senmoviĝis.

Estis jam post la noktiĝo, kiam ili eniris la Minejon. Ili progresis dum pluraj horoj kun nur mallongaj haltoj, kiam Gandalfo alvenis sian unuan

gravan dilemon. Antaŭ li staris larĝa malhela arkaĵo kondukanta al tri koridoroj: ĉiuj iris laŭ la sama ĝenerala direkto orienten, sed la maldekstra koridoro plonĝis suben, dum la dekstra supreniris, kaj la meza vojo ŝajnis pluiri, glata, ebena kaj nivela sed tre mallarĝa.

— Mi tute ne memoras tiun ĉi lokon! — diris Gandalfo, starante hezite sub l' arkaĵo. Li alte tenis sian bastonon, esperante trovi iun indikon aŭ surskribon, kiu eble helpus lian elekton; sed nenio tia estis videbla. — Mi estas tro laca por decidi, — li diris, skuante sian kapon. — Kaj mi supozas, ke vi ĉiuj estas tiel lacaj kiel mi, aŭ pli lacaj. Prefere ni haltu ĉi tie dum la restaĵo de la nokto. Vi scias, kion mi celas! Ĉi tie estas ĉiam mallume; sed ekstere la malfrua luno rajdas okcidenten kaj la meza nokto jam pasis.

— Kompatinda Vilĉjo! — diris Sam. — Mi scivolas, kie li estas. Espereble tiuj lupoj ankoraŭ ne trafis lin.

Maldekstre de l' granda arkaĵo ili trovis ŝtonan pordon; ĝi estis duone fermita, sed svingiĝis malantaŭen facile pro milda ŝovo. Post ĝi ŝajnis etendiĝi larĝa ĉambro ĉizita el la roko.

— Zorge! Zorge! — kriis Gandalfo, kiam Gaja kaj Grinĉjo ŝoviĝis antaŭen, kontentaj trovi lokon, kie ili povus ripozi kun almenaŭ iomete pli forta sento pri ŝirmateco ol en la aperta koridoro. — Zorge! Vi ankoraŭ ne scias, kio enestas. Mi iros la unua.

Li eniris singarde, kaj la aliaj spaliris malantaŭe.

— Jen! — li diris, indikante per sia bastono la mezon de l' planko. Antaŭ liaj piedoj ili vidis grandan rondan truon kiel supron de puto. Rompitaj rustaj ĉenoj kuŝis rande kaj subeniris en la nigran ŝakton. Ŝtoneroj kuŝis proksime.

— Iu el vi povis enfali kaj ankoraŭ scivoli, kiam vi frapos la fundon, — diris Aragorno al Gaja. — Lasu la gvidanton iri la unua, dum tian vi havas.

— Tio ĉi ŝajnas estinti gardista ĉambro, kreita por vaĉado de l' tri koridoroj, — diris Gimlio. — Tiu truo estis evidente puto por uzado far la gardistoj, kovrita de ŝtona kovrilo. Sed la kovrilo estas rompita, kaj ni ĉiuj devas esti singardaj en la mallumo.

Grinĉjo sentis sin logata de la puto. Dum la aliaj malvolvis lankovrilojn kaj pretigis dormejojn apud la muroj de l' ĉambro, laŭeble malproksime de la truo en la planko, li rampis ĝis la rando kaj enrigardis. Ŝajnis frapi lian vizaĝon frosta aero, leviĝanta el nevideblaj profundoj. Pro subita impulso li palpserĉis lozan ŝtonon kaj lasis ĝin enfali. Li sentis sian koron bati multfoje antaŭ ol ekestis sono. Poste malproksime sube, kvazaŭ la ŝtono enfalus profundan akvon en iu kaverna loko, aŭdiĝis *plaŭd*, tre dista, sed plilaŭtigita kaj ripetita en la kava ŝakto.

— Kio estas tio? — kriis Gandalfo. Li estis malŝarĝita, kiam li aŭdis, kion faris Grinĉjo; sed li estis kolera, kaj Grinĉjo povis vidi ekbrilon de lia okulo. — Stultulo Tjuko! — li graŭlis. — Tio ĉi estas serioza vojaĝo, ne hobita promenado. Enĵetu vin mem la venontan fojon, kaj poste vi ne plu estos ĝena. Jam silentu!

Nenio pli aŭdiĝis dum pluraj minutoj; sed poste el la profundaĵo leviĝis mallaŭtaj frapoj: *tom-tap, tap-tom*. Ili ĉesis, kaj kiam la eĥoj forvelkis, ili estis ripetitaj: *tap-tom, tom-tap, tap-tap, tom*. Ili sonis maltrankvilige kiel iaj signaloj; sed post kelka tempo la frapado forvelkis kaj ne plu aŭdiĝis.

— Tio estis la sono de martelo, aŭ tion mi neniam antaŭe aŭdis, — diris Gimlio.

— Jes, — diris Gandalfo, — kaj ĝi ne plaĉas al mi. Ĝi eble ne rezultiĝis de l' stulta ŝtono de Peregrino; sed probable io estas perturbita, kiu prefere estus lasita sen ĝeno. Mi petas, ke vi faru nenion similan estontece! Ni esperu profiti iom da ripozo sen plua ĝenado. Vi, Grinĉjo, prenu la unuan vaĉon, kiel kompensaĵon, — li graŭlis, volvante sin per lankovrilo.

Grinĉjo sidis mizere apud la pordo en la kompleta mallumo; sed li daŭre sin turnadis, timante, ke io nekonata elrampos el la puto. Li sopiris kovri la truon, eĉ se nur per lankovrilo, sed li ne kuraĝis moviĝi aŭ proksimiĝi al ĝi, malgraŭ tio, ke Gandalfo ŝajnis dormanta.

Fakte, Gandalfo estis maldorma, kvankam li kuŝis senmove kaj silente. Li profunde pensadis, provante revoki ĉiun memoron pri sia antaŭa vojaĝo en la Minejoj, kaj pripensante maltrankvile la postan farotaĵon; erara turniĝo nun eble estus katastrofa. Post unu horo li leviĝis kaj alvenis Grinĉjon.

— Iru en angulon kaj iom dormu, knabo mia, — li diris per afabla tono. — Vi deziras dormi, mi supozas. Mi tute ne povas, do prefere mi plenumu la vaĉon.

— Mi scias, kio min perturbas, — li murmuris, sidiĝante apud la pordo. — Mi bezonas fumi! Mi tion ne gustumis depost la mateno antaŭ la neĝoŝtormo.

La lasta vido de Grinĉjo, kiam li endormiĝis, estis malhela bildo pri l' maljuna sorĉisto kaŭranta sur la planko, ŝirmante ardan ligneron en siaj nodozaj manoj inter la genuoj. La flagro momente vidigis lian akran nazon, kaj la nubeton da fumo.

Estis Gandalfo, kiu vekis ilin ĉiujn. Li sidis kaj vaĉis tute sola dum ĉirkaŭ ses horoj, kaj permesis, ke la ceteraj ripozu.

— Kaj dum la nokta vaĉado mi decidiĝis, — li diris. — Al mi ne plaĉas la sento de l' meza vojo; kaj ne plaĉas la odoro de l' *maldekstra vojo: tie sube la aero malpuras, aŭ gvidisto mi ne estas. Mi elektos la dekstran*

koridoron. Jam estas tempo, ke ni denove supreniru.

Dum ok malhelaj horoj, ne enkalkulante du mallongajn haltojn, ili marŝis pluen; kaj ili renkontis neniun danĝeron, kaj aŭdis nenion, kaj vidis nenion krom la malfortan ekbrilon de la bastono de l' sorĉisto zigzaganta kiel marĉfajrero antaŭ ili. La elektita koridoro serpentumis grade supren. Laŭ ilia juĝkapablo ĝi progresis laŭ grandaj suprenirantaj kurbiĝoj, kaj leviĝante ĝi iĝis pli alta kaj pli larĝa. Ne plu estis enirejoj al aliaj galerioj aŭ tuneloj ambaŭflanke, kaj la planko estis ebena kaj sendamaĝa, sen truoj aŭ fendetoj. Evidente ili estis trafintaj iam gravan ĉefvojon; kaj ili iris pli rapide ol dum la unua marŝado.

Tiamaniere ili progresis proksimume dek kvin mejlojn, se mezuri laŭ rekta linio orienten, kvankam efektive ili devis marŝi dudek mejlojn aŭ pli. Dum la vojo grimpis supren, la animo de Frodo iom plifortiĝis, sed li ankoraŭ sentis sin premita, kaj de tempo al tempo aŭdis, aŭ supozis aŭdi, malproksime malantaŭ la Kunularo kaj preter la susuro kaj frapetado de iliaj piedoj, sekvantajn paŝsonojn, kiuj ne estis eĥo.

Ili marŝis tiom, kiom la hobitoj povis toleri sen ripozo, kaj ĉiuj pensis pri loko, kie ili povos dormi, kiam subite malaperis la muroj dekstre kaj maldekstre. Ili ŝajnis esti trapasintaj ian arkforman pordon en nigran malplenan spacon. Malantaŭ ili estis forta blovo da aero pli varma, kaj antaŭ ili la mallumo fridis sur iliaj vizaĝoj. Ili haltis kaj kunpremiĝis maltrankvile.

Gandalfo ŝajnis kontenta.

— Mi elektis la ĝustan vojon, — li diris. — Finfine ni alproksimiĝas al la loĝeblaj partoj, kaj mi konjektas, ke ni jam ne malproksimas de l' orienta flanko. Sed ni situas alte, multe pli alte ol la Dimrila Pordo, se mi ne eraras. Laŭ sentiĝo de l' aero ni verŝajne estas en larĝa halo. Nun mi riskos pri iom da reala lumo.

Li levis sian bastonon, kaj dum momenteto vidiĝis ekbrilego kiel fulmero. Grandaj ombroj ekestis kaj fuĝis, kaj dum sekundo ili vidis larĝan plafonon fore super la kapoj subtenatan de multaj fortikaj pilastroj masonitaj el ŝtono. Antaŭ ili kaj ambaŭflanke etendiĝis grandega malplena halo; ĝiaj nigraj muroj, poluritaj kaj vitrece glataj, flagris kaj ekbrilis. Tri aliajn enirejojn ili vidis, malhelajn nigrajn arkaĵojn: unu rekte antaŭe oriente, kaj po unu ambaŭflanke. Poste la lumo estingiĝis.

— Nur tiom mi riskos nuntempe, — diris Gandalfo. — Antaŭe estis fenestregoj sur la montoflanko, kaj ŝaktoj kondukantaj al la lumo en la plej supraj etaĝoj de l' Minejoj. Mi opinias, ke ni jam atingis ilin, sed denove estas nokto ekstere, kaj ĝis la mateno ni ne povos scii. Se mi pravas, morgaŭ ni eble efektive vidos la matenon engvatanta. Sed dume ni prefere ne pluiru. Ni ripozu, se ni povos. Ĉio pasis bone ĝis nun, kaj la pliparto de l' malhela

vojo estas finita. Sed ni ankoraŭ ne trapasis, kaj la vojo suben ĝis la Pordoj, kiuj malfermiĝas al la mondo, estas longa.

La Kunularo pasigis tiun nokton en la granda kaverna halo, kunpremite proksime en angulo por eviti la trablovon: ŝajnis esti kontinua enfluo de frosta aero tra l' orienta arkaĵo. Ĉie ĉirkaŭe dum ili kuŝis pendis la mallumo, kava kaj grandega, kaj ilin premadis la soleco kaj vasteco de la haloj kaj senfine disbranĉiĝantaj ŝtuparoj kaj koridoroj. La plej ekstremaj imagaĵoj, kiujn morna onidiro iam sugestiis al la hobitoj, tute ne atingis la realajn timigon kaj mirigon de Morio.

— Certe iam estis ĉi tie amasego da gnomoj, — diris Sam, — kaj ĉiuj el ili pli aktivaj ol meloj dum kvincent jaroj por krei ĉion ĉi, cetere plejparte en solida roko! Pro kio ili faris ĝin? Ili ne loĝis en ĉi tiuj malhelaj truoj, ĉu?

— Tiuj ĉi ne estas truoj, — diris Gimlio. — Tio ĉi estas la granda regno kaj urbego de la Gnoma Regno. Kaj pratempe ĝi ne estis malhela, sed lumoplena kaj impona, kiel ankoraŭ memorigas niaj kantoj.

Li leviĝis kaj starante en la mallumo li komencis ĉanti per profunda voĉo, dum la eĥoj forfuĝis en la tegmenton.

Junis la mond', la montoj verdis,
makulon lunvizaĝ' ne spertis,
vortiĝo mankis ŝtone, roje,
kiam Durino solis voje.
Li nomis valojn kaj la montojn;
gustumis netrinkitajn fontojn;
li Spegullagon enrigardis,
koj tie stela krono ardis
juvele sur arĝenta drapo
super la bild' de lia kapo.

La mondo belis, montoj altis,
pratempe, antaŭ ol ekhaltis
la reĝpotenc' en Nargotrondo
kaj Gondolino, jam el mondo
pasintaj for en okcidento:
tiam tre belis firmamento.

Sur reĝa tron' li sidis mastra
en ŝtona halo multpilastra
kun ortegment', arĝenta planko,
kaj runoj sur la pordoflanko.
La lumo suna, luna, stela
en kristallampoj brilis hela

sen nub’ aŭ nokta interveno
eterne bela sur posteno.

Martel’ amboson tie frapis,
ĉizilo ĉizis, guĝo skrapis;
al klingoj la tenilojn gluis;
minadis oni kaj konstruis,
Berilo, perlo kaj opalo,
forĝiĝis skvamoj el metalo,
ŝildo, armaĵo, glav’, hakilo
iris al brava stok’ po milo.
Senlacis tiam Durinanoj;
submonte sonis la peanoj:
harpistoj harpis, ĥoroj kantis,
trumpeto porde elegantis.

Grizas la mond’, montaro vintras,
forĝeja fajr’ malvarme cindras;
silentas harpo kaj martelo:
regas en Durinhal’ malhelo;
la tombo kuŝas en mallumo
de Moriland’, de Ĥazad-Dumo.
Sed plu dronintaj steloj brilas
en Spegullago, ĉar ekzilas
en ĝi la kron’ kaj kuŝas pli ĝis
Durin’ el dormo revekiĝis.

— Tio plaĉas al mi! — diris Sam. — Mi ŝatus parkeri ĝin. *De Moriland’, de Ĥazad-Dumo*! Sed plipezigas la mallumon, ŝajne, pensado pri ĉiuj tiuj lampoj. Ĉu ankoraŭ troviĝas ĉi tie amasetoj da juveloj kaj oro?

Gimlio silentis. Kantinte, li ne volis ion plian diri.

— Amasetoj da juveloj? — diris Gandalfo. — Ne. La orkoj ofte rabadis en Morio; nenio restas en la supraj haloj. Kaj de kiam fuĝis la gnomoj, neniu kuraĝas serĉi la ŝaktojn kaj trezorejojn sube en la profundejoj: ili estas dronintaj en akvo — aŭ en ombro de timo.

— Do kial la gnomoj volas reveni? — demandis Sam.

— Pro *mitrilo*, — respondis Gandalfo. — La riĉeco de Morio ne devenis de oro kaj juveloj, la ludiloj de l’ gnomoj; nek de fero, ilia servanto. Tiajn aferojn ili trovis ĉi tie, ja vere, precipe feron; sed ili ne estis devigataj elfosi ilin: ĉion deziratan ili povis akiri komerce. Ĉar en la mondo nur ĉi tie troviĝis moria arĝento, aŭ vera arĝento, kiel iuj nomis ĝin: *mitrilo* estas ĝia elfa nomo. La gnomoj havas nomon, kiun ili ne malkaŝas. Ĝi valoris

dekoble pli ol oro, kaj nun estas neprezebla, ĉar malmulto restas sur la tero, kaj eĉ la orkoj ne kuraĝas fosi ĝin ĉi tie. La vejnoj foriras norden al Karadraso, kaj malsupren en la mallumon. La gnomoj nenion rakontas; sed same kiel *mitrilo* estis la fundamento de ilia riĉeco, tiel ĝi ankaŭ detruis ilin: ili fosis tro avide kaj tro profunde, kaj perturbis tion, de kio ili fuĝis, la Plagon de Durino. El tio, kion ili malkovris, la orkoj kolektis preskaŭ ĉion, kaj donis ĝin tribute al Saŭrono, kiu ĝin avidas.

» *Mitrilo*! Ĉiuj deziris ĝin. Ĝi estis batebla kiel kupro, kaj polurebla kiel vitro, kaj la gnomoj kapablis krei el ĝi metalon, malpezan kaj tamen pli duran ol hardita ŝtalo. Ĝia belo similis tiun de ordinara arĝento, sed la belo de *mitrilo* nek senbriliĝis nek forvelkis. La elfoj kore amis ĝin, kaj inter aliaj uzadoj ili faris el ĝi *ithildin*, stellumon, kiun vi vidis sur la pordo. Bilbo havis maŝkirason el *mitrilaj* ringoj, kiun donis al li Torino. Mi scivolas, kio okazis al ĝi? Ankoraŭ subpolviĝadas en la Muzeo de Mult-Fosejo, mi supozas.

— Kio? — kriis Gimlio, surprizite malsilenta. — Ĉu maŝkiraso el la moria arĝento? Tio estis donaco reĝeca!

— Jes, — diris Gandalfo. — Mi tion neniam diris al li, sed ĝi valo ris pli ol la tuta Provinco kun ties tuta enhavo.

Frodo diris nenion, sed li metis sian manon sub la ĉemizon kaj tuŝis la ringojn de sia maŝkiraso. Li sentis konsterniĝon, pensante, ke li marŝis kun la prezo de l' Provinco sub sia jako. Ĉu Bilbo sciis? Li tute ne dubis, ke Bilbo sciis tion bone. Ĝi ja estis donaco reĝeca. Sed jam liaj pensoj estis direktitaj for de la mallumaj Minejoj, al Rivendelo, al Bilbo, kaj al Bag-Endo dum la tagoj, kiam Bilbo ankoraŭ loĝis tie. Li tutkore deziris reesti tie, kaj tiam, tondante la razenon, aŭ umante inter la floroj, li neniam aŭdus pri Morio, *mitrilo* aŭ la Ringo.

Profunda silento estiĝis. Unu post alia ili endormiĝis. Frodo estis vacanto. Kvazaŭ ĝi estus spiro, kiu envenis tra nevidata pordo el profundejoj, timego envolvis lin. Liaj manoj fridis kaj lia frunto malsekis. Li aŭskultis. Lia tuta menso fordoniĝis al aŭskultado kaj nenio alia dum du malrapidaj horoj; sed neniun sonon li aŭdis, eĉ ne imagatan eĥon de piediro.

Lia vaĉo preskaŭ finiĝis, kiam, fore, kie laŭ lia konjekto estis la okcidenta arkaĵo, ŝajnis al li, ke li vidas du palajn lumpunktojn, preskaŭ kiel fosforeskajn okulojn. Li ektremis. Lia kapo estis kliniĝinta. "Mi verŝajne preskaŭ endormiĝis dumvaĉe, — li pensis. — Mi randis sonĝon". Li stariĝis kaj frotis siajn okulojn, kaj restis staranta, rigardante en la mallumon, ĝis lin anstataŭis Legolaso.

Kiam li kuŝiĝis li rapide endormiĝis, sed ŝajnis al li, ke la sonĝo daŭras: li aŭdis flustrojn kaj vidis la du palajn lumpunktojn proksimiĝantaj

malrapide. Li vekiĝis kaj konstatis, ke la aliaj interparolas mallaŭte en la proksimo, kaj ke malforta lumo trafas lian vizaĝon. Alte super la orienta arkaĵo tra ŝakto plafonproksima envenis longa pala ekbrilo; ankaŭ trans la halo tra la norda arkaĵo lumo ekbrilis fore kaj malforte. Frodo sidiĝis.

— Bonan matenon! — diris Gandalfo. — Ĉar finfine denove estas mateno. Vi vidas, ke mi pravis. Ni troviĝas alte sur la orienta flanko de Morio. Antaŭ ol hodiaŭ finiĝos ni verŝajne trovos la Grandan Pordon kaj vidos la akvon de Spegullago kuŝanta antaŭ ni en la Dimrila Valo.

— Mi ĝojos, — diris Gimlio. — Mi jam rigardis Morion, kaj ĝi estas tre granda, sed ĝi iĝis malluma kaj terura; kaj ni trovis neniun postsignon de miaj parencoj. Mi jam dubas, ke Balino iam venis ĉi tien.

Post matenmanĝo Gandalfo decidis pluiri tuj.

— Ni estas lacaj, sed ni ripozos pli trankvile, kiam ni estos ekstere, — li diris. — Al mi ŝajnas, ke neniu el ni volos pasigi plian nokton en Morio.

— Tute ne! — diris Boromiro. — Laŭ kiu direkto ni iru? Tra tiu orienta arkaĵo?

— Eble, — diris Gandalfo. — Sed mi ankoraŭ ne scias precize, kie ni estas. Krom se mi tre eraras, mi pensas, ke ni estas super kaj norde de la Granda Pordo, kaj eble ne estos facile trovi la ĝustan vojon malsupren al ili. La orienta arkaĵo probable pruviĝos la vojo irenda; sed antaŭ ol decidi, ni devus ĉirkaŭrigardi. Ni iru al tiu lumo en la norda pordo. Se ni povus trovi fenestron, tio helpus, sed mi timas, ke la lumo eniras nur tra profundaj ŝaktoj.

Sekvante lin la Kunularo pasis sub la norda arkaĵo. Ili trovis sin en larĝa koridoro. Dum ili laŭiris ĝin la lumo plifortiĝis, kaj ili vidis, ke ĝi envenas tra pordo dekstre. Ĝi estis alta kaj platsupra, kaj la ŝtona pordo pendis sur ĉarniroj kaj estis duone malfermita. Post ĝi estis granda kvadrata ĉambro. Tiu estis malforte lumigata, sed por iliaj okuloj, post tiom da tempo en mallumo, ĝi ŝajnis blindige brila, kaj ili palpebrumis enirante.

Iliaj piedoj perturbis profundan polvon sur la planko, kaj stumblis inter aĵoj kuŝantaj sur la sojlo, kies formojn ili unue ne povis distingi. La ĉambro estis lumigata de larĝa ŝakto alte sur la fora orienta muro; ĝi deklivis supren kaj, tre malproksime supre, eta kvadrato de blua ĉielo estis videbla. La lumo de l' ŝakto falis rekte sur tablon meze de la ĉambro: unuopa marmora bloko, proksimume du futojn alta, sur kiu estis kuŝigita granda plato da blanka ŝtono.

— Ĝi aspektas kiel tombo, — murmuris Frodo, kaj kliniĝis antaŭen kun stranga antaŭsento de io malbona, por rigardi ĝin de pli proksime. Gandalfo venis rapide al lia flanko. Sur la plato estis profunde ĉizitaj runoj:

— Tiuj ĉi estas Runoj de Daerono, kiujn oni uzis pratempe en Morio, — diris Gandalfo. — Ĉi tie estas skribita laŭ la lingvoj de la homoj kaj gnomoj:

BALINO FILO DE FUNDINO MASTRO DE MORIO

— Do li estas mortinta, — diris Frodo. — Tion mi antaŭtimis. Gimlio kovris la kapon per sia kapuĉo.

5

La ponto de Ĥazad-Dumo

La Kunularo de la Ringo staris silente apud la tombo de Balino. Frodo pensis pri Bilbo kaj ties longa amikeco kun la gnomo, kaj pri la vizito de Balino al la Provinco antaŭlonge. En tiu polvokovrita ĉambro en la montoj tio ŝajnis antaŭmiljara kaj aliflanke de la mondo.

Finfine ili ekmoviĝis kaj levis la kapojn, kaj komencis serĉi ion, kio informus ilin pri la sorto de Balino, aŭ montrus, kio okazis al lia popolo. Troviĝis alia pordo pli malgranda aliflanke de l' ĉambro, sub la ŝakto. Ili povis nun vidi, ke apud ambaŭ pordoj kuŝis multaj ostoj, kaj inter ili estis rompitaj glavoj kaj hakiloj, fenditaj ŝildoj kaj kaskoj. Iuj el la glavoj estis kurbaj: orkaj sabroj kun nigriĝintaj klingoj.

Multaj alkovoj estis elĉizitaj en la roko de la muroj, kaj en ili estis grandaj ferligitaj lignaj kestoj. Ĉiuj estis frakasitaj kaj prirabitaj, sed apud unu rompita kovrilo kuŝis restaĵo de libro. Ĝi estis tranĉita, trapikita kaj parte bruligita, kaj ĝi estis tiom makulita de nigraj kaj aliaj malhelaj postsignoj kiel malnova sango, ke malmulte ĝi estis legebla. Gandalfo levis ĝin singarde, sed la folioj kraketis kaj diseriĝis, kiam li surplatigis ĝin. Li zorge ekzamenis ĝin dum kelka tempo senparole. Frodo kaj Gimlio, starante apude, povis vidi, kiam li singardege turnis foliojn, ke ilin skribis multaj diversaj manoj per la runoj de Morio, de Valo kaj ie-tie elfmaniere.

Finfine Gandalfo levis sian kapon.

— Ĝi ŝajnas raporto pri la sorto de l' Balina popolo, — li diris. — Mi supozas, ke ĝi komenciĝis, kiam ili alvenis al Dimrila Valo antaŭ preskaŭ tridek jaroj: la paĝoj ŝajnas numeritaj rilate al la jaroj post ilia alveno. La supra paĝo portas la signon *unu—tri*, do minimume du mankas en la komenco. Aŭskultu jenon!

Niforpelis orkojn el la granda pordo kaj gardo — supozeble, sed ĝi estas misliterita, sekvota probable de *ĉambro — ni mortigis multajn en la hela* — mi kredas — *sunlumo en la valo. Floio estis mortigita per sago. Li mortigis la grandan*. Sekvas malklaraĵo, poste *Floio sub herbo proksime al Spegullago*. La postajn du-tri liniojn mi ne povas legi. Poste venas *Ni prenis la dudek-unuan halon de Nord-fino kiel loĝejon*. Troviĝas mi ne povas legi kio. *Ŝakto* estas menciita. Poste *Balino starigis sian seĝon en la Ĉambro de Mazarbulo*.

— La ĉambro de l’ Arĥivoj, — diris Gimlio. — Supozeble tie ni nun staras.

— Nu, mi nenion plu povas legi poste, — diris Gandalfo, — krom la vorto *oro*, kaj *Hakilo de Durino* kaj ia *kasko*. Poste *Balino estas nun mastro de Morio*. Tio ŝajnas fini ĉapitron. Post kelkaj steletoj alia skribanto komencas, kaj ni povas vidi *ni trovis veran arĝenton*, kaj poste la vorton *bone forĝita*, kaj poste io. Mi scias! *mitrilo*; kaj la lastaj du linioj *Oino iros serĉi la suprajn armilejojn de Tria Profundo*, io, *iros okcidenten*, malklaraĵo, *ĝis Holina pordo*.

Gandalfo paŭzis kaj flankenmetis kelkajn foliojn.

— Estas pluraj paĝoj samspecaj, iom haste skribitaj kaj multe difektitaj, — li diris; — sed mi malmulte povas deĉifri ilin per tiu ĉi lumo. Pluraj folioj mankas, ĉar ili komencas nombriĝi *kvin*, la kvina jaro de l’ kolonio, mi supozas. Mi vidu! Ne, ili estas tro tranĉitaj kaj makulitaj; mi ne povas legi ilin. Ni eble pli bone sukcesus en sunlumo. Atendu! Jen estas io: granda nigra manskribo uzanta elfajn runojn.

— Verŝajne la manskribo de Orio, — diris Gimlio, rigardante trans la brakon de la sorĉisto. — Li sciis skribi klare kaj rapide, kaj ofte uzis la elfajn literojn.

— Mi timas, ke li devis registri malbonajn novaĵojn per bela manskribo, — diris Gandalfo. — La unua klara vorto estas *malĝojo*, sed la cetero de la linio estas perdita, krom se ĝi finiĝas per *raŭ*. Jes, tio devas esti *hieraŭ*, kiun sekvas *la dekan de novembro Balino, mastro de Morio, mortis en Dimrila Valo. Li iris sola por enrigardi la Spegullagon. Orko mortpafis lin de malantaŭ ŝtono. Ni mortigis la orkon, sed multaj aliaj... el oriento laŭ Arĝentvejno*. La cetero de l’ paĝo estas tiel malklara, ke preskaŭ nenion mi povas deĉifri, sed mi kredas legi *ni baris la pordojn*, kaj poste *povos defendi ilin se*, kaj poste eble *terur* kaj *sufer*. Kompatinda Balino! ŝajnas, ke li retenis la adoptitan titolon dum malpli ol kvin jaroj. Mi scivolas, kio okazis poste; sed mankas tempo por deĉifri la lastajn kelkajn paĝojn. Jen la plej lasta el ĉiuj paĝoj. — Li paŭzis kaj ĝemspiris.

— Ĝi estas malagrabla legaĵo, — li diris. — Mi timas, ke ilia sorto estis kruela. Aŭskultu! *Ni ne povas eliri. Ni ne povas eliri. Ili kaptis la Ponton kaj duan halon. Fraro, Lonio kaj Nalio pereis tie*. Sekvas kvar linioj ŝmiritaj tiel, ke mi povas legi nur *iris antaŭ 5 tagoj*. La lastaj linioj legiĝas *la lago atingis la muron ĉe la okcidenta pordo. La Gvatanto de la Akvo prenis Oinon. Ni ne povas eliri. La fino proksimiĝas*, kaj poste *tamburoj, tamburoj en la profundo*. Mi scivolas, kion tio signifas. La lasta skribaĵo per treniĝa skribaĉo de elfaj literoj: *ili venas*. Sekvas nenio pli. — Gandalfo paŭzis kaj staris silente pensante.

Subita timego kaj hororo pri la ĉambro inundis la Kunularon.

— Ni ne povas eliri, — murmuris Gimlio. — Estis bonŝance por ni, ke la lago jam sinkis iom, kaj ke la Gvatanto dormadis ĉe la suda finaĵo.

Gandalfo levis sian kapon kaj ĉirkaŭrigardis.

— Ŝajnas, ke ili starigis lastan defendon ĉe ambaŭ pordoj, — li diris; — sed ne multaj restis tiam. Tiel finiĝis la klopodo rekapti Morion! Estis kuraĝe sed malsaĝe. La horo ankoraŭ ne venis. Nun, mi timas, ni devas adiaŭi Balinon, filon de Fundino. Ĉi tie li devas kuŝadi en la halo de siaj prapatroj. Ni kunprenos tiun ĉi libron, la Libron de Mazarbulo kaj ekzamenos ĝin pli detale poste. Prefere, Gimlio, vi retenu ĝin kaj redonu ĝin al Daino, se vi trovos eblecon, Ĝi interesos lin, kvankam ĝi profunde malĝojigos lin. Ek, ni iru! La mateno forpasas.

— Laŭ kiu direkto ni iru? — demandis Boromiro.

— Reen al la halo, — respondis Gandalfo. — Sed nia vizito al tiu ĉi ĉambro ne estis vana. Mi jam scias, kie ni estas. Tiu ĉi devas esti, kiel diras Gimlio, la Ĉambro de Mazarbulo; kaj la halo devas esti la dudek-unua de la Nord-fino. Sekve ni devus foriri tra l' orienta arkaĵo de la halo, kaj direktiĝi dekstren kaj suden, kaj iri malsupren. La dudek-unua halo devus esti sur la Sepa Etaĝo, nome ses super la nivelo de l' Pordoj. Ek jam! Reen ĝis la halo!

Apenaŭ Gandalfo finparolis, jen aŭdiĝis bruego: ruliĝanta *Bum*, kiu ŝajnis alveni la profundon fore sube, kaj tremi en la ŝtonoj sub iliaj piedoj. Ili saltis al la pordo alarmite. *Dum, dum*, — ruliĝis denove, kvazaŭ gigantaj manoj tamburigus la kavernojn mem de Morio. Sekvis reeĥa klariono: granda korno estis blovata en la halo, kaj respondaj kornoj kaj krudaj krioj estis aŭdataj pli malproksime. Aŭdiĝis sono de multaj rapidantaj piedoj.

— Ili venas! — kriis Legolaso.

— Ni ne povas eliri, — diris Gimlio.

— Enfermitaj! — kriis Gandalfo. — Kial mi prokrastis? Jen ni estas, enfermitaj, ĝuste kiel ili pli frue. Sed tiam ne ĉeestis mi. Ni vidos kion...

Dum, dum, — *aŭdiĝis la tamburbatoj kaj la muroj tremis*.

— Plenfermu la pordojn kaj kojnu ilin! — kriis Aragorno. — Kaj retenu kiel eble plej longe viajn tornistrojn: ni eble trovos eblecon ankoraŭ eltranĉi nin.

— Ne! — diris Gandalfo. — Ni nepre ne estu enfermitaj. Lasu aperta la orientan pordon! Ni eliros tien, se ni havos eblecon.

Alia kruda klariono kaj akraj krioj sonis. Piedoj proksimiĝis laŭ la koridoro. Aŭdiĝis sonoro kaj klakado dum la Kunularo elingigis siajn glavojn. Glamdringo brilis per pala lumo, kaj Piko ekbrilis ĉe la eĝoj. Boromiro metis sian ŝultron al la okcidenta pordo.

— Atendu momenton! Ankoraŭ ne fermu ĝin! — diris Gandalfo. Li

saltis antaŭen al la flanko de Boromiro kaj plenrektigis sin.

— Kiu venas ĉi tien por perturbi la ripozon de Balino, Mastro de Morio? — li kriis laŭte.

Aŭdiĝis bruo de kruda ridado, kiel falo de glitantaj ŝtonoj en puton; dum la bruego voĉo profunda leviĝis komande. *Dum, dum, dum*, — aŭdiĝis la tamburoj en la profundo.

Per subita moviĝo Gandalfo paŝis antaŭ la mallarĝan aperturon de l' pordo kaj puŝis antaŭen sian bastonon. Vidiĝis blindiga ekbrilo, kiu lumigis la ĉambron kaj la koridoron ekstere. Momente la sorĉisto elrigardis. Sagoj siblis kaj fajfis tra la koridoro dum li retrosaltis.

— Ĉeestas orkoj, tre multaj, — li diris. — Kaj kelkaj estas grandaj kaj misaj: nigraj urukoj el Mordoro. Provizore ili hezitas, sed troviĝas io alia tie. Granda kavern-trolo, ŝajnas al mi, aŭ pli ol unu. Neniu espero pri eskapo tiudirekten.

— Kaj tute neniom da espero, se ili alvenos ankaŭ la alian pordon, — diris Boromiro.

— Ĉi tie estas ankoraŭ neniu sono ekstere, — diris Aragorno, kiu staris aŭskultante apud la orienta pordo. — La koridoro ĉi-flanke plonĝas rekte suben per ŝtuparo: ĝi klare ne rekondukas al la halo. Sed ne utilas blinde fuĝi ĉi-direkten kun persekuto ĝuste malantaŭe. Ni ne povas bari la pordon. Mankas ĝia ŝlosilo kaj la seruro estas rompita, kaj ĝi malfermiĝas internen. Ni devas unue fari ion por malhelpi la malamikon. Ni devigos ilin timi la ĉambron de Mazarbulo! — li diris minace, fingrumante la eĝon de sia glavo Andurilo.

Pezaj paŝoj aŭdiĝis en la koridoro. Boromiro ĵetis sin kontraŭ la pordon kaj puŝfermis ĝin; poste li kojnis ĝin per rompitaj glavklingoj kaj splitaĵoj da ligno. La Kunularo retretis ĝis la kontraŭa flanko de l' ĉambro. Sed ankoraŭ ne eblis fuĝi. Okazis bato sur la pordon, kiu tremigis ĝin; kaj poste ĝi komencis grate malfermiĝi malrapide repuŝante la kojnojn. Grandegaj brako kaj ŝultro kun malhela verdskvama haŭto, enŝoviĝis tra la larĝiĝanta breĉo. Poste grandega, plata, senfingra piedo enpuŝiĝis sube. Ekstere ĉio komplete silentis.

Boromiro saltis antaŭen kaj hakis la brakon per sia tuta forto; sed lia glavo tintegis, turniĝis flanken, kaj falis el lia skuita mano. La klingo estis noĉita.

Subite, kaj mem surprizite, Frodo sentis ekflami en sia koro varmegan koleron.

— La Provinco! — li kriis, kaj saltinte apud Boromiron, li kliniĝis kaj traboris per Piko la hidan piedon. Aŭdiĝis blekego, kaj la piedo abrupte retiriĝis, preskaŭ elŝirante Pikon el la brako de Frodo. Nigraĵo gutis de la

klingo kaj fumis sur la planko. Boromiro ĵetegis sin kontraŭ la pordon kaj batfermis ĝin denove.

— Unu por la Provinco! — kriis Aragorno. — La hobito mordas profunden! Vi havas bravan klingon, Frodo filo de Drogo!

La pordo estis bategita, kaj sekvis batego post batego. Ramoj kaj marteloj estis frapegantaj sur ĝin. Ĝi krakis kaj ŝanceliĝe interniĝis, kaj la aperturo subite larĝiĝis. Sagoj enfajfis, sed trafis la nordan muron, kaj falis sendanĝere sur la plankon. Aŭdiĝis klariono kaj piedkurado, kaj orkoj unu post alia ensaltis la ĉambron.

Kiom multaj ili estis, la Kunularo ne povis taksi. La luktado estis akra, sed la orkojn senkuraĝigis la furioza defendo. Legolaso pafis du tra la gorĝo. Gimlio forhakis la krurojn de alia, kiu estis saltinta sur la tombon de Balino. Boromiro kaj Aragorno mortigis multajn. Kiam dek tri estis falintaj la cetero fuĝis ŝrikante, lasante la defendintojn nedifektitaj krom Sam, sur kies verto estis gratvundo. Savis lin rapida kaŭriĝo; kaj li faligis sian orkon per forta piko de sia dolmena glavo. Fajro ardis en liaj brunaj okuloj, kiu fuĝigus Tedon Sablomano, se tiu vidus ĝin.

— Nun estas ĝusta momento! — kriis Gandalfo. — Ni iru, antaŭ ol revenos la trolo!

Sed ĝuste kiam ili retretis, kaj antaŭ ol Grinĉjo kaj Gaja atingis la ŝtuparon ekstere, grandega ĉeforko, preskaŭ home alta, vestita de kapo ĝis piedoj per nigra maŝarmaĵo, ensaltis la ĉambron; malantaŭ tiu grupiĝis en la pordejo kelkaj sekvistoj. Lia larĝa plata vizaĝo estis bistra, liaj okuloj similis karberojn, kaj lia lango estis ruĝa; li portis grandan lancon. Per ŝovo de sia granda fela ŝildo li forturnis la glavon de Boromiro kaj lin puŝis malantaŭen, surterigante lin. Plonĝante sub baton far Aragorno kun rapideco de mordanta serpento, li alkuregis la Kunularon kaj pikis rekte per sia lanco al Frodo. La bato trafis tiun dekstraflanke, kaj Frodo estis ĵetita al la muro kaj alpikita. Sam, kriante, hakis la lanctenilon, kaj ĝi rompiĝis. Sed ĝuste kiam la orko deĵetis la stumpon kaj elingigis sian sabron, Andurilo trafis lian kaskon. Vidiĝis ekbrilo kvazaŭ flamo kaj la kasko disfendiĝis. La orko falis kun la fendita kapo. Liaj sekvistoj fuĝis hurlante, kiam Boromiro kaj Aragorno alsaltis ilin.

Dum, dum resonis la tamburoj en la profundo. La forta voĉo denove elruliĝis.

— Nun! — kriis Gandalfo. — Jen la lasta ebleco. Forkuru!

Aragorno levis Frodon, kiu kuŝis apud la muro, kaj direktiĝis al la ŝtuparo, puŝante antaŭ si Gajan kaj Grinĉjon. La aliaj sekvis; sed Gimlion devis fortreni Legolaso: malgraŭ la danĝero li restis apud la tombo de Balino kun la klinita kapo. Boromiro tirfermis la orientan pordon,

grincantan sur la ĉarniroj: ĝi havis ambaŭflanke grandajn ferajn ringojn, sed ne povis esti fiksfermata.

— En ordo ĉe mi, — anhelis Frodo. — Mi kapablas marŝi. Demetu min!

Aragorno preskaŭ faligis lin pro mirego.

— Mi supozis vin mortinta! — li kriis.

— Ankoraŭ ne! — diris Gandalfo. — Sed mankas tempo por miri. Ek, ĉiuj, malsupren ŝtupare! Atendu min kelkajn minutojn sube, sed se mi ne venos baldaŭ, pluiru! Rapide, kaj elektu vojojn dekstren kaj suben.

— Ni ne povas lasi vin por defendi sola la pordon! — diris Aragorno.

— Faru laŭ mia ordono! — diris Gandalfo severe. — Glavoj jam ne utilas ĉi tie. Iru!

Neniu ŝakto lumigis la koridoron kaj ĝi estis tute malluma. Ili palpserĉis sian vojon suben laŭ longa ŝtuparo, kaj poste rerigardis; sed nenion ili povis vidi, krom alte supre glimon de l' bastono de la sorĉisto. Li ŝajnis ankoraŭ gardostari apud la fermita pordo. Frodo peze spiris kaj apogiĝis al Sam, kiu ĉirkaŭbrakis lin. Ili staris fiksrigardante supren tra l' ŝtuparo en la mallumon. Frodo pensis, ke li aŭdas la voĉon de Gandalfo supre, murmurantan vortojn, kiuj laŭkuris la deklivan tegmenton kun suspira eĥo. Li ne povis kapti la diratajon. La muroj ŝajnis tremi. De tempo al tempo ruliĝis kaj pulsis: *dum, dum*.

Subite ĉe la supro de l' ŝtuparo elpikiĝis blanka lumo. Poste sekvis obtuza rulmuĝo kaj peza batsono. La tamburado eruptis frenezece: *dum-bum, dum-bum*, kaj poste ĉesis. Gandalfo alvenis kurege laŭ la ŝtuparo kaj falis teren meze de la Kunularo.

— Nu, bone! Jen finite! — diris la sorĉisto pene starigante. — Mi faris mian tutan eblon. Sed mi trafis egalulon, kaj preskaŭ detruiĝis. Sed ne staru senmove! Antaŭen! Vi devos malhavi lumon dum kelka tempo: mi estas iom skuita. Antaŭen! Iru! Kie vi estas, Gimlio? Venu antaŭen kun mi! Sekvu proksime, ĉiuj!

Ili stumble sekvis lin, scivolante pri l' okazajo. *Dum, dum*, — sonis denove la tamburbatoj: ili jam sonis obtuze kaj malproksime, sed ili sekvis. Aŭdiĝis neniu alia sono de persekutado, nek piedpaŝoj nek iu ajn voĉo. Gandalfo neniom turniĝis, ĉu dekstren ĉu maldekstren, ĉar la koridoro ŝajnis direktiĝi laŭ liaj deziroj. De tempo al tempo ĝi malsupreniris per ŝtuparo, kvindekŝtupa aŭ pli, al malpli alta nivelo. Tiutempe tio estis la ĉefa danĝero; ĉar en la mallumo ili ne povis vidi malsupreniron, ĝis ili alvenis ĝin kaj elmetis piedon en malplenon. Gandalfo palpis la teron bastone kiel blindulo.

Post unu horo ili progresis unu mejlon, aŭ eble pli, kaj malsupreniris multajn ŝtuparojn. Ankoraŭ ne aŭdiĝis persekuto. Ili preskaŭ komencis esperi, ke ili eskapos. Sube de l' sepa ŝtuparo Gandalfo haltis.

— Varmegiĝas! — li anhelis. — Ni devas esti subiĝintaj almenaŭ ĝis nivelo de l' Pordoj. Mi opinias, ke baldaŭ ni serĉu turniĝon maldekstren por konduki nin orienten. Espereble ne malproksimas. Mi estas lacega. Mi devas ripozi momenton ĉi tie, eĉ se ĉiuj orkoj iam frajitaj persekutus nin.

Gimlio kaptis lian brakon kaj helpis lin sidiĝi sur ŝtupon.

— Kio okazis tie supre ĉe la pordo? — li demandis. — Ĉu vi renkontis la tamburiston?

— Mi ne scias, — respondis Gandalfo. — Sed mi subite trovis, ke mi frontas ion, kion mi neniam renkontis antaŭe. Mi povis pensi pri nenio krom fermsorĉi la pordon. Mi konas multajn manierojn, sed tiaj aferoj postulas tempon, kaj eĉ tiel la pordon oni povas perforte trarompi.

» Starante tie mi povis aŭdi orkajn voĉojn: mi kredis, ke tre baldaŭ ili trarompos ĝin. Mi ne povis aŭdi, kio estis dirata; sed ili ŝajnis paroli per sia propra hida lingvo. Mi komprenis nur *ghash*, tio estas 'fajro'. Poste envenis io en la ĉambron — mi sentis ĝin tra la pordo, kaj la orkoj mem ektimis kaj silentiĝis. Ĝi kaptis la feran ringon, kaj tiam ĝi perceptis min kaj mian sorĉaĵon.

» Kio ĝi estis, mi ne povas konjekti, sed neniam mi spertis tian provokon. La kontraŭsorĉo estis terura. Ĝi preskaŭ rompis min. Momente la pordo eskapis mian regadon kaj komencis malfermiĝi! Mi devis prononci la Komandan Vorton. Tio pruviĝis tro granda streĉo. La pordo dispeciĝis. Io nube malhela forbaris la tutan lumon interne, kaj mi estis ĵetita malantaŭen tra l' ŝtuparo. La tuta muro kolapsis, kaj ankaŭ la tegmento de l' ĉambro, mi opinias.

» Mi timas, ke Balino estas profande surkovrita, kaj eble ankaŭ io alia estas surkovrita tie. Mi ne scias. Sed almenaŭ estas tute barita la pasejo malantaŭ ni. Ha! Neniam mi sentis min tiom elĉerpita, sed tio pasas. Kaj nun kio pri vi, Frodo? Mankis tempo por diri tion, sed neniam en mia vivo mi tiom ĝojis kiom pro via ekparolo. Mi timis, ke tiu hobito, kiun Aragorno portis, estas kuraĝa, sed mortinta.

— Kio pri mi? — diris Frodo. — Mi vivas kaj sendifektas, mi opinias. Mi estas kontuzita kaj dolora, sed tio ne tro ĝenas.

— Nu, — diris Aragorno, — mi povas diri nur, ke hobitoj estas konstruitaj el materialo tiel fortika, ke mi neniam trafis ion similan. Se mi scius tion, mi estus parolinta pli milde en la taverno en Brio! Tiu lancpiko estus trapasinta sovaĝan apron!

— Nu, feliĉe ĝi ne trapasis min, — diris Frodo; — kvankam mi sentas min kvazaŭ batita inter martelo kaj amboso. — Li nenion diris pli. Dolorigis lin la spirado.

— Vi similas al Bilbo, — diris Gandalfo. — Ĉe vi estas pli, ol okulo

perceptas, kiel mi diris pri li antaŭlonge. — Frodo scivolis, ĉu tiu komento signifis pli, ol supraĵe ŝajnis.

Nun ili denove pluiris. Post nelonge Gimlio ekparolis. En la mallumo li havis okulojn akrajn.

— Mi opinias, — li diris, — ke antaŭe estas lumo. Sed ne taglumo. Ĝi estas ruĝa. Kio ĝi povas esti?

— *Ghash*! — murmuris Gandalfo. — Mi scivolas, ĉu tion ili priparolis: ke la subaj etaĝoj brulas? Tamen ni povas nur pluiri.

Baldaŭ la lumo iĝis nemiskomprenebla, kaj estis videbla al ĉiuj. Ĝi flagris kaj ardis sur la muroj fore laŭ la koridoro antaŭ ili. Ili jam povis vidi la vojon: antaŭe la pado abrupte deklivis suben, kaj iom malproksime staris malalta arkaĵo; tra kiu venis la kreskanta lumo. La aero varmegiĝis.

Kiam ili alvenis la arkaĵon, Gandalfo trairis, signante al la aliaj, ke ili atendu. Kiam li staris ĝuste post la trapasejo, ili vidis lian vizaĝon lumigita de ruĝa ardeco. Rapide li retropaŝis.

— Ĉi tie estas ia nova misaĵo, — li diris, — elpensita por nin bonvenigi, sendube. Sed mi jam scias, kie ni troviĝas: ni atingis la unuan nivelon, la etaĝon ĝuste sub la Pordego. Tiu ĉi estas la dua halo de Malnova Morio; kaj la Pordego estas proksima: post la orienta fino, maldekstre, ne pli ol kvaronmejlon. Trans la Ponton, supren laŭ larĝa ŝtuparo, tra la Unua Halo, kaj eksteren! Sed venu rigardi!

Ili elrigardis. Antaŭ fli estis alia kaverneca halo. Ĝi estis pli alta kaj multe pli longa ol tiu, en kiu ili dormis. Ili estis proksimaj al ties orienta fino; okcidente ĝi etendiĝis en mallumon. Tra la centro spiralis duobla vico de baŭmantaj pilastroj. Ili estis gravuritaj kiel arbotrunkoj, kies branĉoj subtenis la tegmenton per disetenda retaĵo el ŝtono. Iliaj trunkoj estis glataj kaj nigraj, sed ruĝa ardeco malhele speguliĝis sur ties flankoj. Rekte trans la planko, proksime al la suboj de du grandegaj pilastroj, granda fendaĵo estis malfermiĝinta. El tiu venis forte ruĝa lumo, kaj de tempo al tempo flamoj lekis la randon kaj volviĝis ĉirkaŭ la ŝoklojn de l' kolonoj. Malhelaj fumeroj tremis sur la varmega aero.

— Se ni venus laŭ la ĉefa vojo malsupren de l' supraj haloj, ni estus enfermitaj ĉi tie, — diris Gandalfo. — Ni esperu, ke la fajro nun troviĝas inter ni kaj la persekutado. Venu! Nepras ne perdi tempon.

Ĝuste dum li parolis ili aŭdis denove la persekutantan tamburadon: *Dum, dum, dum*. Fore post la ombroj ĉe la okcidenta fino de l' halo aŭdiĝis krioj kaj klarionoj. *Dum, dum*! la pilastroj ŝajnis tremi kaj la flamoj ŝanceliĝi.

— Ek al la lasta vetkuro! — diris Gandalfo. — Se la suno brilas ekstere, ni eble ankoraŭ eskapos. Sekvu min!

Li turniĝis maldekstren kaj transkuris la glatan plankon de la halo. La distanco estis pli longa ol ĝi aspektis. Kurante ili aŭdis batadon kaj eĥon de multaj rapidaj piedoj malantaŭe. Aŭdiĝis akra kriĉo: ili estis rimarkitaj. Estis tintego kaj klakado de ŝtalo. Sago fajfis super la kapon de Frodo. Boromiro ridis:

— Tion ili ne atendis. La fajro forbaras ilin. Ni estas malĝustaflanke!

— Rigardu antaŭen! — vokis Gandalfo. — La Ponto proksimas. Ĝi estas danĝera kaj mallarĝa.

Subite Frodo ekvidis antaŭ si nigran abismon. Fine de la halo la planko malaperis kaj falis en nekonatan profundon. La ekstera pordo estis atingebla nur per gracila ponto el ŝtono, sen randmureto aŭ balustrado, kiu transarkis l' abismon per unuopa kurba ĵetiĝo de kvindek futoj. Tio estis antikva defendilo de l' gnomoj kontraŭ malamiko, kiu kaptus la Unuan Halon kaj la eksterajn koridorojn. Ili povis transiri nur po unu. Ĉe la eĝo Gandalfo haltis kaj la aliaj grupiĝis malantaŭe.

— Iru la unua, Gimlio! — li diris. — Poste Grinĉjo kaj Gaja. Rekte antaŭen, kaj supren laŭ la ŝtuparo post la pordo!

Sagoj falis inter ilin. Unu frapis Frodon kaj resaltis. Alia trapikis la ĉapelon de Gandalfo kaj restis tie kvazaŭ nigra plumo. Frodo retrorigardis. Trans la fajro li vidis svarmantajn nigrajn figurojn: ŝajnis troviĝi centoj da orkoj. Ili svingis lancojn kaj sabrojn, kiuj brilis ruĝe kiel sango pro la fajrolumo. *Dum, dum*, — ruliĝis la tamburado, iĝante pli kaj pli laŭta, — *dum, dum*.

Legolaso sin turnis kaj metis sagon al sia pafarko, kvankam la distanco estus longa por pafo. Li kurbigis la arkon, sed lia mano tremis, kaj la sago falis teren. Li eligis krion pro konsterniĝo kaj timo. Du grandaj troloj aperis; ili portis grandajn ŝtonoblokojn, kaj deĵetis ilin por esti paŝpontoj trans la fajron. Sed ne estis la troloj, kiuj terurigis la elfon. La vicoj de l' orkoj malfermiĝis, kaj ili forpuŝiĝis, kvazaŭ ili mem timus. Io alproksimiĝis de malantaŭ ili. Ne estis videble, kio ĝi estis: ĝi similis ombregon, meze de kiu estis malhela figuro, eble homforma, tamen pligranda. En ĝi kaj antaŭ ĝi ŝajnis potenco kaj teruro.

Ĝi alvenis la randon de l' fajro kaj la lumo velkis kvazaŭ nubo kurbiĝus al ĝi. Poste ĝi senpene transsaltis la fendegon. La flamoj suprenhurlis renkonte al ĝi, envolvis ĝin; kaj nigra fumo kirliĝis en la aero. Ĝiaj striantaj kolharoj ekbrulis, kaj flamis malantaŭ ĝi. En ĝia dekstra mano estis klingo kiel pikanta fajrolango; per la maldekstra ĝi tenis vipon multvostan.

— Aj! Aj! — lamentis Legolaso. — Balrogo! Venas balrogo! Gimlio fiksrigardis larĝokule.

— La Plago de Durino! — li kriis, kaj lasante fali sian hakilon li kovris

sian vizaĝon.

— Balrogo, — murmuris Gandalfo. — Jam mi komprenas. — Li hezitis kaj peze apogis sin sur sian bastonon. — Kia misfortuno! Kaj mi jam lacegas.

La malhela fajrostrianta figuro kuregis al ili. La orkoj hurlis kaj transfluis la ŝtonajn paŝpontojn. Tiam Boromiro levis sian komon kaj blovis. Laŭte sonoris kaj blekis la defio, kiel kriego multgorĝa sub la kaverneca tegmento. Momente la orkoj hezitis, kaj la fajra ombro haltis. Poste la eĥoj subite silentiĝis kvazaŭ flamo, blovestingita per malhela vento, kaj denove la malamikoj antaŭeniris.

— Trans la ponton! — kriis Gandalfo, revokinte sian forton. — Fuĝu! Jen malamiko, kiu superas vin. Mi devas defendi la mallarĝan vojon. Fuĝu! — Aragorno kaj Boromiro malatentis la ordonon, sed staris firme, flankalflanke, malantaŭ Gandalfo ĉe la fino de la ponto. La aliaj haltis ĝuste en la pordaperturo ĉe fino de la halo, kaj sin turnis, ne povante permesi, ke ilia estro frontu sola la malamikon.

La balrogo alvenis la ponton. Gandalfo staris meze de l' arkaĵo, apogante sin per la bastono en sia maldekstra mano, sed en la aiia mano brilis Glamdringo, malvarma kaj blanka. Lia malamiko denove haltis, frontante lin, kaj la ombro ĉirkaŭ ĝi etendiĝis kiel du grandaj flugiloj. Ĝi levis la vipon, kaj la vostoj kriĉis kaj krakis. Fajro eliris el ĝiaj naztmoj. Sed Gandalfo staris fortike.

— Vi ne povas pasi, — li diris. La orkoj staris senmove, kaj ĉio komplete silentiĝis. — Mi estas servanto de l' Sekreta Fajro, manipulanto de la flamo de Anoro. Vi ne povas pasi. La malhela fajro ne hel~ pos vin, flamon de Uduno. Reiru al la Ombro! Vi ne povas pasi.

La balrogo nenion respondis. La fajro en ĝi ŝajnis velki, sed la mallumo fortiĝis. Ĝi paŝis antaŭen malrapide sur la ponton, kaj subite ĝi sin rektigis ĝis granda alto, kaj ĝiaj flugiloj etendiĝis de muro al muro; sed ankoraŭ Gandalfo estis videbla, glimante en la malhelo; li ŝajnis eta kaj tute sola: griza kaj kurbiĝinta, kiel ŝrumpa arbo antaŭ komenciĝo de ŝtormo.

El la ombro saltis flamanta ruĝa glavo.

Glamdringo ekbrilis blanka responde.

Aŭdiĝis tintego kaj elpikis blanka fajro. La balrogo retropaŝis kaj ĝia glavo suprenflugis en fragmentoj fandiĝantaj. La sorĉisto ŝanceliĝis sur la ponto, retroiris unu paŝon, kaj denove ekstaris senmova.

— Vi ne povas pasi! — li diris.

Per alĵetiĝo la balrogo plensaltis sur la ponton. Ĝia vipo kirliĝis kaj siblis.

— Li ne devas stari sola! — kriis Aragorno subite kaj rekuris laŭ la

ponto. — Elendilo! — li kriis. — Mi kunestas, Gandalfo!

— Gondoro! — kriis Boromiro kaj saltis post lin. Tiumomente Gandalfo levis sian bastonon, kaj kriante laŭte li frapegis la ponton antaŭ si. La bastono disrompiĝis kaj falis el lia mano. Blindiga maso da blanka flamo suprenflugis. La ponto fendiĝis. Ĝuste ĉe la piedoj de la balrogo ĝi rompiĝis, kaj la ŝtono sur kiu ĝi staris kraŝis en l' abismon, dum la ceteraj restis, ekvilibrigitaj, tremantaj kvazaŭ rok-lango elpuŝita en malplenon.

Kun terura krio la balrogo falis antaŭen, kaj ĝia ombro suben plonĝis kaj malaperis. Sed ĝuste dumfale ĝi svingis sian vipon, kaj la vostoj frapis kaj volviĝis ĉirkaŭ la genuojn de l' sorĉisto, trenante lin ĝis la rando. Li ŝanceliĝis kaj falis, vane kroĉiĝante al la ŝtono, kaj glitis en la abismon.

— Fuĝu, stultuloj! — li kriis, kaj estis for.

La fajroj estingiĝis kaj ekestis kompleta mallumo. La Kunularo staris senmove pro hororo, fiksrigardante en l' abismon. Ĝuste kiam Aragorno kaj Boromiro revenis kurege, la cetero de l' ponto fendiĝis kaj falis. Per krio Aragorno revivigis ilin.

— Venu! Nun mi kondukos vin! — li vokis. — Ni devas obei lian lastan ordonon. Sekvu min!

Ili stumblis malorde supren laŭ la ŝtuparo preter la pordo. Aragorno antaŭis, Boromiro malantaŭis. Ĉe la supro estis larĝa eĥanta koridoro. Laŭ ĝi ili fuĝis. Frodo aŭdis Samon ploranta ĉe sia flanko, kaj poste li konstatis, ke ankaŭ li ploras dum la kurado. *Dum, dum, dum*, — la tamburbatoj ruliĝis malantaŭe, jam funebre kaj malrapide, — *dum*!

Ili plukuris. La lumo kreskis antaŭ ili; grandaj lumstrioj trapikis la tegmenton. Ili kuris pli rapide. Ili eniris halon, helan pro taglumo el la altaj fenestroj oriente. Ili fuĝis trans ĝin. Ĝiajn grandajn rompitajn pordojn ili trapasis, kaj subite antaŭ ili malfermiĝis la Granda Pordego, arkaĵo da brilega lumo.

Gardistaro de orkoj kaŭris en la ombroj malantaŭ la pordfostegoj baŭmantaj ambaŭflanke, sed la pordo estis frakasita kaj faligita. Aragorno terenbatis la kapitanon, kiu frontis lin, kaj la ceteraj fuĝis timigite de lia kolero. La Kunularo preterkuregis ilin kaj ilin tute malatentis. Tra la Pordego ili kuris kaj salte descendis la grandajn trivitajn ŝtupojn, la sojlon de Morio.

Tiel, finfine ili venis preterespere sub la ĉielon kaj sentis venton sur siaj vizaĝoj.

Ili ne haltis ĝis ili troviĝis ekster pafatingo de l' muroj. La Dimrila Valo estis ĉirkaŭe. Surkuŝis ĝin ombro de l' Nebulecaj Montoj, sed oriente oro lumis sur la tero. Estis nur unu horo post la tagmezo. La suno brilis. La nuboj estis blankaj kaj altaj.

Ili rerigardis. Malhele oscedis la arkaĵo de l’ Pordego sub ombro de l’ montaro. Mallaŭte kaj malproksime sub la tero ruliĝis la malrapidaj tamburbatoj: *dum*. Maldensa nigra fumo eldrivis. Nenio alia estis videbla; la ĉirkaŭa valo estis tute malplena. *Dum*. Finfine malĝojego tute venkis ilin, kaj longe ili ploris: iuj starantaj kaj silentaj, iuj kuŝantaj tere. *Dum, dum*. La tamburbatoj forvelkis.

6

Lotlorieno

Ve! Mi timas, ke ni ne povos pli longe resti ĉi tie, — diris Aragorno. Li alrigardis la montojn kaj alte tenis sian glavon. — Adiaŭ, Gandalfo! — li kriis. — Ĉu mi ne diris al vi: *se vi trapasos la pordon de Morio, gardu vin*? Ve, mi diris veron! Kian esperon ni havas sen vi? — Li sin turnis al la Kunularo. — Ni devas malhavi esperon. Almenaŭ ni eble venĝos nin. Ni fortigu nin kaj ne plu ploru! Venu! Antaŭ ni estas vojo longa, kaj multo farenda.

Ili stariĝis kaj ĉirkaŭrigardis. Norde la valo supreniris en interejon de ombroj inter du grandaj montobrakoj, super kiuj brilis tri blankaj pintoj: Celebdilo, Fanuidolo, Karadraso, la Montoj de Morio. Ĉe l' supro de la intermonto fluis torento kvazaŭ blanka punto trans senfinan ŝtuparon da mallongaj akvofaloj, kaj ŝaŭmnebulo ŝvebis en la aero ĉirkaŭ la montosuboj.

— Jen la Dimrila Ŝtuparo, — diris Aragorno, fingromontrante la akvofalojn. — Malsupren laŭ la profunde fendita vojo, kiu apudas la torenton, ni devis alveni, se la sorto estus pli afabla.

— Aŭ Karadraso malpli kruela, — diris Gimlio. — Jen ĝi staras ridetanta en la sunlumo! — Li skuis sian pugnon al la plej fora el la neĝvertaj pintoj kaj forturniĝis.

Oriente la etendita brako de l' montoj marŝis al subita fino, kaj foraj landoj estis videblaj post ili, larĝaj kaj svagaj. Sude la Nebulecaj Montoj retroiris senfine ĝis limo de la vidkapablo. Malproksime malpli ol mejlon, kaj iom sube, ĉar ili ankoraŭ staris alte sur la okcidenta flanko de la valo, kuŝis lago. Ĝi estis longa kaj ovala, formita kvazaŭ granda lancpinto ŝovita profunden en la nordan intermonton; sed ĝia suda fino preteris la ombrojn sub la sunbrila ĉielo. Tamen ĝia akvo estis malhela: profunde blua kiel klara vesperĉielo vidita de lampluma ĉambro. Ĝia supraĵo estis senmova kaj neperturbita. Ĉirkaŭ ĝi kuŝis glata razeno, kiu descendis brete je ĉiuj flankoj ĝis ĝia nuda nerompita bordo.

— Tie kuŝas la Spegullago, profunda Ĥeled-Zaramo! — diris Gimlio malgaje. — Mi memoras, Mon li diris: "Spertu ĝojon rigardante ĝin! Sed tie ni ne povos restadi". Nun mi vojaĝos longe antaŭ ol sperti denove ĝojon. Estas mi, kiu devas forrapidi, kaj li, kiu devas resti.

Nun la Kunularo malsupreniris la vojon for de la Pordego. Ĝi estis malglata kaj rompita, velkante ĝis serpentuma pado inter erikoj kaj ileksoj, kiuj elpuŝiĝis inter la fendiĝontaj ŝtonoj. Sed ankoraŭ estis videble, ke iam antaŭlonge granda pavimita vojo serpentumis supren el la malaltejoj de l' Gnoma Regno. En kelkaj lokoj estis ruiniĝintaj ŝtonaj monumentoj kaj amasetoj da verdo, kiujn kronis gracilaj betuloj aŭ abioj, susurantaj pro la vento. Kurbiĝo orienten kondukis ilin tute apud la gazonon de Spegullago, kaj tie ne malproksime de l' vojflanko staris unuopa kolono supre rompita.

— Jen la ŝtono de Durino! — kriis Gimlio. — Mi ne povas preteriri, ne flankenirinte momenton por rigardi la mirajon de la valo!

— Do rapidu! — diris Aragorno, retrorigardante al la Pordego. — La suno subiros frue. La orkoj, eble, ne elvenos ĝis la noktiĝo, sed tiam ni devas troviĝi tre malproksime. La luno preskaŭ tutŝrumpis kaj hodiaŭ nokte estos mallume.

— Akompanu min, Frodo! — kriis la gnomo, saltante for de l' pado. — Mi ne volas, ke vi foriru ne vidinte Ĥeled-Zaramon. — Li subenkuris la longan verdan deklivon. Frodo sekvis malrapide, logite de la senmova blua akvo malgraŭ doloro kaj laco; Sam kuniris malantaŭe.

Apud la staranta ŝtono Gimlio haltis kaj rigardis supren. Ĝi estis fendetita kaj vetertrivita, kaj la malklaraj runoj sur ĝia flanko estis nelegeblaj.

— Tiu ĉi kolono signas la lokon, kie Durino la unuan fojon rigardis en la Spegullagon, — diris la gnomo. — Ni mem rigardu unufoje, antaŭ ol foriri!

Ili kliniĝis super la malhela akvo. Komence ili povis nenion vidi. Poste, malrapide, ili vidis la formojn de la ĉirkaŭantaj montoj spegulitaj en profunda bluo, kaj la pintoj similis plumarojn da blankaj flamoj super ili; plue estis spaco da.fielo. Tie simile al juveloj enprofundigitaj brilis eksparkaj steloj, kvankam la suno lumis sur la ĉielo super ili. De iliaj propraj kliniĝantaj formoj videblis eĉ ne ombro.

— O Ĥeled-Zaramo bela kaj mirinda! — diris Gimlio. — Tie kuŝas la krono de Durino ĝis li vekiĝos. Adiaŭ! — Li riverencis, kaj fortumis sin, kaj rerapidis laŭ la gazono denove ĝis la pado.

— Kion vi vidis? — diris Grinĉjo al Sam, sed Sam tro profundiĝis en pensadon por respondi.

La vojo nun turniĝis suden kaj rapide malsupreniris, etendiĝante el inter la brakoj de la valo. Iom malsupre de la lago ili alvenis profundan akvoputon, klaran kiel kristalo, de kiu flueto transiris ŝtonan lipon kaj fluis ekbrile kaj gargare malsupren laŭ apika roka kanelo.

— Jen la fonto, el kiu leviĝas Arĝentvejno, — diris Gimlio. — Ne

trinku el ĝi! Ĝi estas glacie malvarma.

— Baldaŭ ĝi iĝas rapida rivero, ĉar ĝi ĉerpas akvon el multaj aliaj montaj rojoj, — diris Aragorno. — Nia vojo apudiras ĝin dum multaj mejloj. Ĉar mi kondukos vin tra la vojo, kiun Gandalfo elektis, kaj unue mi esperas alveni la arbaron, kie Arĝentvejno enfluas la Grandan Riveron — tie fore. — Ili rigardis tien, kien li indikis, kaj antaŭ si ili povis vidi la rojon saltanta al la fundo de l' valo, kaj poste pluiranta foren ĝis la malaltejoj, ĝis ĝi perdiĝis en ora nebuleco.

— Tie kuŝas la arbaroj de Lotlorieno! — diris Legolaso. — Tio estas la plej bela el ĉiuj loĝejoj de mia popolo. Ne ekzistas arboj similaj al la arboj de tiu lando. Ĉar aŭtune iliaj folioj ne falas, sed oriĝas. Nur kiam la printempo venas, kaj la nova verdaĵo malfermiĝas, ili falas, kaj tiam branĉojn pezigas flavaj floroj; kaj la tero de l' arbaro estas ora, kaj ora estas la tegmento, kaj ĝiaj kolonoj estas arĝentaj, ĉar la ŝeloj de la arboj estas glataj kaj grizaj. Tiel diras ankoraŭ niaj kantoj en Mornarbaro. Mia koro ĝojus, se mi troviĝus sub la tegmentorandoj de tiu arbaro printempe!

— Mia koro ĝojas eĉ vintre, — diris Aragorno. — Sed ĝi troviĝas multajn mejlojn for. Ni rapidu!

Dum kelka tempo Frodo kaj Sam sukcesis resti kun la aliaj, sed Aragorno gvidis ilin rapidege, kaj post iom da tempo ili komencis postresti. Ili manĝis nenion depost la frua mateno. La vundo de Sam ardis kiel fajro, kaj lia kapo sentis vertiĝeton. Malgraŭ la brila suno la vento ŝajnis malvarma post la varma mallumo de Morio. Li tremetis. Frodo trovis ĉiun paŝon pli doloriga kaj li anhelis pro spiromanko.

Finfine Legolaso turniĝis, kaj vidante, ke ili estas jam tre malantaŭaj, li alparolis Aragornon. La aliaj haltis, kaj Aragorno rekuris, vokante Boromiron, ke tiu akompanu lin.

— Mi petas pardonon, Frodo! — li kriis, zorgoplena. — Tiom okazis hodiaŭ, kaj tiom necesas rapideco, ke mi forgesis, ke vi estas vundita; kaj ankaŭ Sam. Vi devis ion diri. Ni faris nenion facilige por vi, kiel ni devus, eĉ se persekutus nin ĉiuj orkoj de Morio. Ek do! Iomete pli antaŭe estas loko, kie ni povos iomete ripozi. Tie mi faros por vi ĉion eblan. Venu, Boromiro! Ni portos ilin.

Baldaŭ poste ili alvenis alian rivereton, kiu fluis el la okcidento kaj aligis sian bobelan akvon al la rapidanta Arĝentvejno. Kune ili plonĝis trans falejon de verdkolora ŝtono, kaj ŝaŭmis supren en valeton. Ĉirkaŭ ĝi staris abioj, stumpaj kaj kurbaj, kaj ĝiaj flankoj estis apikaj kaj vestitaj per skolopendrioj kaj mirtelarbustoj. Ĉe la subo estis ebenejo, tra kiu la rojo fluis brue trans brilajn ŝtonetojn. Tie ili ripozis. Jam pasis preskaŭ tri horoj post la tagmezo, kaj ili vojaĝis nur kelkajn mejlojn de l' Pordego. La suno

jam eksubiris okcidente.

Dum Gimlio kaj la du pli junaj hobitoj ekbruligis fajron el vepraĵo kaj abiaj branĉetoj kaj ĉerpis akvon, Aragorno flegis Samon kaj Frodon. La vundo de Sam ne estis profunda, sed ĝi aspektis malsane, kaj la vizaĝo de Aragorno estis zorgema dum li esploris ĝin. Post momento li rigardis supren malŝarĝite.

— Bonŝance, Sam! — li diris. — Multaj ricevis pli malbonan vundon page al mortigo de sia unua orko. La tranĉo ne estas venenita, kiel estas tro ofte ĉe la vundoj per orkaj klingoj. Ĝi verŝajne bone kuraciĝos, kiam mi estos fleginta ĝin. Lavu ĝin, kiam Gimlio varmigos iom da akvo.

Li malfermis sian saketon kaj elprenis kelkajn velkintajn foliojn.

— Ili estas sekaj kaj perdis iom da efikeco, — li diris, — sed jen mi havas ankoraŭ kelkajn foliojn de *atelaso*, kiujn mi plukis proksime al Veterverto. Kunpremu unu el ili en la akvo, kaj lavpurigu la vundon, kaj mi bandaĝos ĝin. Nun estas via vico, Frodo!

— Ĉe mi en ordo, — diris Frodo, ne dezirante, ke liaj vestaĵoj estu tuŝataj. — Mi bezonas nur kelkan manĝaĵon kaj iom da ripozo.

— Ne! — diris Aragorno. — Ni devas rigardi por konstati, kion faris al vi la martelo kaj amboso. Mi ankoraŭ miras, ke vi entute vivas. — Malkrude li formetis la malnovan jakon kaj trivitan ĉemizon de Frodo kaj eligis mirspiregon. Poste li ridis. La arĝenta maŝkiraso trembrilis antaŭ liaj okuloj kiel lumo sur ondeta maro. Zorge li forprenis kaj alte tenis ĝin, kaj la gemoj sur ĝi ekbrilis kiel steloj, kaj la bruo de la skuataj ringoj sonis kvazaŭ tinto de pluvo sur lageton.

— Vidu, amikoj! — li vokis. — Jen beleta hobita haŭto por envolvi elfan princidon! Se estus konate, ke hobitoj havas tiajn haŭtojn, ĉiuj ĉasantoj de Mez-Tero alrajdus la Provincon.

— Kaj ĉiuj sagoj de ĉiuj ĉasistoj en la mondo estus vanaj, — diris Gimlio, mire fiksrigardante la kirason. — Ĝi estas *mitrila* vesto. *Mitrilo*! Mi neniam vidis nek priaŭdis ekzempleron tiel belan. Ĉu pri tiu ĉi maŝkiraso parolis Gandalfo? Se jes, li subtaksis ĝin. Sed ĝi estis bone donacita!

— Mi ofte scivolis, kion faras vi kaj Bilbo, tiom intime en lia ĉambreto, — diris Gaja. — Benatu la maljuna hobito! Mi amas lin pli ol antaŭe. Mi esperas, ke ni havos okazon rakonti al li pri ĝi!

Sur la dekstraj flanko kaj brusto de Frodo estis malhela kaj nigriĝinta kontuzo. Sub la kiraso estis ĉemizo el mola ledo, sed unuloke la ringoj estis trapuŝitaj en la karnon. Ankaŭ la maldekstra flanko estis gratita kaj kontuzita, kie li estis ĵetita kontraŭ la muron. Dum la aliaj pretigis la manĝon, Aragorno lavpurigis la vundojn per akvo, en kiu estis trempita la *atelaso*. La pika parfumo plenigis la valeton, kaj ĉiuj, kiuj kliniĝis super la

vaporanta akvo, sentis sin refreŝigitaj kaj fortigitaj. Baldaŭ Frodo sentis foriri la doloron, kaj lia spirado faciliĝis: kvankam dum multaj tagoj li estis malfleksiĝema kaj netuŝinda. Aragorno ligis kelkajn molajn vataĵojn al lia flanko.

— La kiraso estas mirinde malpeza, — li diris. — Surmetu ĝin denove, se vi povas tion toleri. Mia koro ĝojas, sciante ke vi havas tian vestaĵon. Ne formetu ĝin, eĉ dormonte, krom se sorto venigos vin tien, kie vi provizore estos sekura; kaj tion malofte ebligos la hazardo dum la daŭro de via misio.

Manĝinte, la Kunularo prepariĝis pluiri. Ili estingis la fajron kaj kaŝis ties spurojn. Poste, grimpinte el la valeto, ili ekmarŝis denove. Ili ne multe progresis antaŭ ol la suno subiris malantaŭ la okcidentaj altaĵoj, kaj ombregoj subenrampis la montflankojn. Krepusko vualis iliajn piedojn, kaj nebuleto leviĝis en la kavejoj. Malproksime en la oriento la vespera lumo kuŝis pala sur la neklaraj terenoj de distaj ebenaĵoj kaj arbaroj. Sam kaj Frodo, jam sentante sin faciligitaj kaj tre freŝigitaj, kapablis paŝi sufiĉe rapide, kaj kun nur unu halto Aragorno kondukis antaŭen la Kunularon dum preskaŭ tri pliaj horoj.

Estis mallume. Profunde noktiĝis. Vidiĝis multaj klaraj steloj, sed la rapide malkreskanta luno ne estus vidata ĝis malfrue. Gimlio kaj Frodo iris lastaj, marŝante mallaŭte kaj ne parolante, por aŭdi iun ajn sonon sur la vojo malantaŭe. Finfine Gimlio rompis la silenton.

— Neniu sono krom la vento, — li diris. — Neniuj orkoj proksimas, aŭ miaj oreloj estas lignaj. Espereble la orkoj kontentiĝos forpelinte nin el Morio. Kaj eble tio estas ilia tuta celo, kaj ni alie ne koncernis ilin — nek la Ringo. Tamen orkoj ofte persekutas malamikojn multmejle sur la ebenaĵon, se ili volas venĝi falintan kapitanon.

Frodo ne respondis. Li rigardis al Piko, kaj la klingo estis malbrila. Tamen li aŭdis ion, aŭ tion li supozis. Tuj post kiam la ombroj ĉirkaŭis ilin kaj la vojo malantaŭe estis malhela, li aŭdis denove la rapidan klakadon de piedpaŝoj. Ankaŭ nun li aŭdis ĝin. Li rapide sin turnis. Vidiĝis malantaŭe du etaj ekbriloj da lumo, aŭ momente li supozis vidi ilin, sed tuj ili glitis flanken kaj malaperis.

— Kio estas? — diris la gnomo.

— Mi ne scias, — respondis Frodo. — Mi pensis, ke mi aŭdas paŝojn, kaj mi pensis, ke mi vidas lumon — kvazaŭ okulojn. Mi tion pensis ofte, de kiam ni unue eniris Morion.

Gimlio haltis kaj kliniĝis al la tero.

— Mi aŭdas nenion krom la noktan paroladon de plantaĵoj kaj ŝtonoj, — li diris. — Ek! Ni rapidu! La aliaj jam ne vidiĝas.

La nokta vento blovis froste tra la valo renkonte al ili. Antaŭ ili staris

larĝa griza ombro, kaj ili aŭdis senfinan susuradon de folioj kvazaŭ poploj en la trablovo.

— Lotlorieno! — kriis Legolaso. — Lotlorieno! Ni alvenis ĝis la tegmentorandoj de l' Ora Arbaro. Ve, ke vintro estas!

En la nokto la arboj staris altaj antaŭ ili, arkitaj super la vojo kaj rojo, kiuj subite fluis sub iliajn etenditajn branĉojn. En la malbrila lumo de l' steloj iliaj trunkoj estis grizaj, kaj iliaj tremantaj folioj subsugestiis novalan oron.

— Lotlorieno! — diris Aragorno. — Mi ĝojas aŭdi denove venton en la arbaro! Ni troviĝas apenaŭ pli ol dek kvin mejlojn for de l' Pordego, sed ni ne kapablas iri plu. Ĉi tie ni esperu, ke la efikeco de l' elfoj gardos nin hodiaŭ nokte de la minaco, kiu postsekvas.

— Se efektive elfoj ankoraŭ loĝas ĉi tie en la malheliĝanta mondo, — diris Gimlio.

— Pasis longa tempo, de kiam iuj el mia popolo revojaĝis ĉi tien ĝis la lando, de kie ni forvagis en praepoko, — diris Legolaso, — sed ni aŭdis, ke Lorieno ankoraŭ ne estas senpopola, ĉar ĉi tie estas potenco sekreta, kiu fortenas misaĵojn el la lando. Tamen ĝia popolo estas malofte vidata, kaj eble ili jam loĝas profunde en la arbaro kaj malproksime de l' norda limo.

— Ja profunde en la arbaro ili loĝas, — diris Aragorno, kaj ĝemspiris, kvazaŭ ekmoviĝus en li iu memoraĵo. — Ni devas nin prizorgi mem hodiaŭ vespere. Ni mallonge pluiru, ĝis la arboj tute ĉirkaŭos nin, kaj tiam ni flankiĝos de la pado kaj serĉos lokon por ripozi. Li paŝis antaŭen; sed Boromiro staris heziteme kaj ne sekvis.

— Ĉu ne ekzistas alia vojo? — li diris.

— Kian alian pli taŭgan vojon vi deziras? — diris Aragorno.

— Klaran vojon, eĉ se ĝi kondukas tra glavbaraĵo, — diris Boromiro. — Laŭ strangaj padoj estas tiu ĉi Kunularo kondukita, kaj ĝis nun al misfortuno. Kontraŭ mia volo ni pasis sub la ombrojn de Morio, je nia perdo. Kaj nun ni devas eniri la Oran Arbaron, laŭ vi. Sed pri tiu danĝera lando ni aŭdis en Gondoro, kaj oni diras, ke eliris malmultaj enirintoj; kaj el tiuj malmultaj neniu eskapis nedifektite.

— Ne diru *nedifektite*, sed se vi diros *neŝanĝite*, eble tiam vi parolos veron, — diris Aragorno. — Sed la scioj velkas en Gondoro, Boromiro, se en la urbo de tiuj, kiuj iam estis saĝaj, oni nun parolas mise pri Lotlorieno. Kredu kion vi volas, por ni ne ekzistas alia vojo — krom se vi emas reiri al la Moria Pordo, aŭ grimpi la senpadajn montojn, aŭ naĝi tutsola laŭ la Granda Rivero.

— Do antaŭen! — diris Boromiro. — Sed estas danĝere.

— Danĝere efektive, — diris Aragorno, — bele kaj danĝere; sed ĝin

devas timi nur misaĵo, aŭ tiuj, kiuj kunportas misaĵon. Sekvu min!

Ili iris malpli ol unu mejlon en la arbaron, kiam ili alvenis alian rivereton, malsupren fluantan rapide de la arbokovritaj deklivoj, kiuj altiĝis denove okcidente al la montaro. Ili aŭdis ĝin transplaŭdanta je akvofalo malproksime inter la ombroj dekstre. Ĝiaj malhelaj hastaj akvoj transiris la padon antaŭ ili, kaj aliĝis al Arĝentvejno en kirliĝo de neklaraj lagetoj inter la radikoj de l' arboj.

— Jen Nimrodelo! — diris Legolaso. — Pri tiu ĉi rivereto la arbaraj elfoj verkis multajn kantojn antaŭlonge, kaj ni ankoraŭ kantas ilin en la nordo, memorante pri la ĉielarko ĉe ĝiaj faloj kaj la oraj floroj, kiuj flosis sur ĝia ŝaŭmo. Ĉio estas nun malluma kaj la ponto de Nimrodelo estas rompiĝinta. Mi banos miajn piedojn, ĉar oni diras, ke la akvo estas kuracilo por la laculoj.

Li iris antaŭen kaj grimpis malsupren laŭ la profunde fendita bordo kaj enpaŝis la rivereton.

— Sekvu min! — li kriis. — La akvo ne estas profunda. Ni transvadu! Sur la kontraŭa bordo ni povos ripozi, kaj la bruo de l' *falanta akvo eble havigos al ni dormon kaj forgeson pri malĝojo*.

Unu post alia ili grimpis malsupren kaj sekvis Legolason. Dum momento Frodo staris proksime al la bordo kaj lasis flui la akvon trans siajn lacajn piedojn. Ĝi estis malvarma sed ĝia tuŝo estis pura, kaj kiam li pluiris kaj ĝi leviĝis al liaj genuoj, li sentis, ke la vojaĝmakuloj kaj ĉiu laceco estas forlavitaj de liaj membroj.

Kiam la tuta Kunularo estis transirinta, ili sidiĝis, ripozis kaj manĝis; kaj Legolaso rakontis al ili historiojn pri Lotlorieno, kiujn la elfoj de Mornarbaro vartis ankoraŭ en siaj koroj, pri lumo de suno kaj steloj sur la razenoj apud la Granda Rivero antaŭ ol la mondo griziĝis.

Finfine ili silentiĝis kaj ekaŭdis la muzikon de la akvofalo fluantan dolĉe en la ombroj. Frodo preskaŭ imagis, ke li aŭdas voĉon kantantan, miksitan kun la bruo de la akvo.

— Ĉu vi aŭdas la voĉon de Nimrodela? — demandis Legolaso. — Mi kantos por vi kanton pri la junulino Nimrodela, kiu havis la saman nomon kiel la rivereto, apud kiu ŝi vivis antaŭlonge. Ĝi estas bela kanto en nia arbara lingvo; sed jen kiel ĝi sonas en la okcidentaĵo, kiel iuj en Rivendelo nun kantas ĝin.

Per mallaŭta voĉo apenaŭ aŭdebla inter la susurado de la folioj super ili li komencis:

Elfino en pratemp' irizis,
dumtage brila stelo:
ŝuparo ŝia arĝent-grizis,

or-orlis la mantelo.

Ligiĝis stel’ al ŝia frunto,
ĉe l’ kap’ lumdiademo
kiel tra branĉoj suna punto
en bela Lorieno.

La haroj longis, membroj blankis,
ŝi estis flekstalia;
envente ŝi leĝere dancis
kiel foli’ tilia.

ĉe l’ akvofalo Nimrodela,
kie la akvo klaris,
en lagon ŝia voĉ’ fabela
kiel arĝento falis.

Neniu scias pri la loko
kien ŝi sin forkaŝis;
ĉar Nimrodel’ en praepoko
sur montoj disen paŝis.

La elfa ŝipo en haveno,
ŝirmata de montaro,
atendis longe sur posteno
apud la muĝa maro.

Dumnokta vent’ en Nordaj Landoj
leviĝis, fajfis laŭta,
la ŝipon pelis for de l’ strandoj
per tajdo flue plaŭda.

Aŭrore mont’ kaj ter’ retretis
preter ondara baŭmo,
kiu plumerojn alten ĵetis
da blindiganta ŝaŭmo.

Amroto la terbordon vidis
jam preter akvo ŝvela,
malbenis ŝipon, kiu splitis
lin for de Nimrodela.

Li estis elfa reĝ’ pratempe,
lordo de valtereno,
dum oris la branĉar’ pratempe

en bela Lorieno.

De l’ direktil’ al mar’ li saltis,
al trafa sag’ simila,
kaj plonĝis, kien akvo altis,
kiel la mev’ flugila.

Tra l’ haroj blovis vento flirta,
ĉirkaŭis ŝaŭma signo;
kaj pluen forta, bela, virta,
li rajdis kvazaŭ cigno.

El Okcident’ neniu vorto,
kaj sur la Cisa Plaĝo
al elf-popolo pri Amroto
ne venis plu mesaĝo.

La voĉo de Legolaso hezitis, kaj la kanto ĉesis.

— Mi ne plu povas kanti, — li diris. — Tio estas nur parto, sed mi forgesis multon. Ĝi estas longa kaj trista, ĉar ĝi rakontas kiel malĝojo venis al Lotlorieno, Lorieno de la arbofloroj, kiam la gnomoj vekis misecon en la montaro.

— Sed la gnomoj ne kreis la misecon, — diris Gimlio.

— Tion mi ne diris, tamen miseco venis, — respondis Legolaso malgaje. — Tiam multaj elfoj el la parencaro de Nimrodela forlasis siajn loĝejojn kaj foriris, kaj ŝi estis perdita malproksime en la sudo, en la pasejoj de la Blankaj Montoj, kaj ŝi ne alvenis la ŝipon, Me ŝia amanto Amroto atendis ŝin. Sed dum la printempo, kiam la vento trablovas la novajn foliojn, la eĥo de ŝia voĉo aŭdeblas ankoraŭ apud la akvofaloj, kiuj portas ŝian nomon. Kaj kiam la vento estas suda, la voĉo de Amroto alvenas de la maro; ĉar Nimrodelo enfluas Arĝentvejnon, kiun la elfoj nomas Celebranto, kaj Celebranto en Anduinon la Grandan, kaj Anduino enfluas la Golfon de Belfalaso, de kie ekvelis la elfoj de Lorieno. Sed nek Nimrodela, nek Amroto iam ajn revenis.

» Oni diras, ke ŝi konstruigis domon sur la branĉoj de arbo, kiu kreskis proksime al la akvofaloj; ĉar tio estis kutimo de la elfoj de Lorieno, loĝi sur la arboj, kaj eble ankaŭ nun estas tiel. Sekve ili estis nomataj Galadrimoj, la Arbopopolo. Profunde en la arbaro la arboj estas tre grandaj. La popolo de l’ arbaro ne fosis la teron kiel gnomoj, nek konstruis fortikaĵojn el ŝtono antaŭ ol la Ombro venis.

— Kaj eĉ dum ĉi postaj tagoj loĝado sur la arboj ŝajnas pli sekura ol sidado sur la tero, — diris Gimlio. Li rigardis trans la rivereton al la vojo,

kiu rekondukis al Dimrila Valo, kaj poste supren al la tegmento el malhelaj branĉoj.

— Viaj vortoj alportas bonan konsilon, Gimlio, — diris Aragorno. — Ni ne povas konstrui domon, sed hodiaŭ nokte ni faros kiel la Galadrimoj kaj serĉos ŝirmadon ĉe la arbosuproj, se ni povos. Ni jam sidis ĉi tie apud la vojo pli longe ol estus saĝe.

La Kunularo nun turniĝis flanken de l' vojo kaj eniris la ombron de la pli profundaj arbaroj, okcidenten apud la monta rojo for de Arĝentvejno. Ne malproksime de l' akvofalo de Nimrodelo ili trovis grupon da arboj, el kiuj pluraj pendis super la rivereto. Iliaj grandaj grizaj trunkoj estis fortike rondaj, sed la alteco ne estis divenebla.

— Mi grimpos supren, — diris Legolaso. — Mi estas hejme inter arboj, ĉu radike, ĉu branĉe, kvankam ĉi tiuj arboj estas speco nekonata al mi, krom nome en kanto. *Malornoj* ili nomiĝas, kaj ĝuste ili naskas la flavajn arboflorojn, sed mi neniam grimpis sur tian. Mi jam vidos, kia estas ilia formo kaj kreskmaniero.

— Kia ajn ĝi estos, — diris Grinĉjo, — ili ja estas arboj mirindaj, se ili proponas ripozon nokte, krom al birdoj. Mi ne povas dormi sur stango!

— Do fosu truon en la tero, — diris Legolaso, — se tio pli konvenas al via gento. Sed vi devos fosi rapide kaj profunde, se vi volas kaŝi vin de orkoj. — Li saltis malpeze de la tero kaj kaptis branĉon, kiu elkreskis el la trunko alte super lia kapo. Sed ĝuste dum li svingiĝis tie dum momento, voĉo subite ekparolis el la arboombroj super li.

— *Daro*! — ĝi diris per tono komanda, kaj Legolaso refalis al la tero surprizite kaj timigite. Li kaŭris kontraŭ la arbotrunko.

— Staru senmove! — li flustris al la aliaj. — Nek moviĝu nek parolu!

Aŭdiĝis mallaŭta ridado super iliaj kapoj, kaj poste alia klara voĉo ekparolis elf-lingve. Frodo povis malmulte kompreni la diratajon, ĉar la lingvo, kiun la arbara popolo uzas inter si, malsimilas tiun de la okcidento. Legolaso rigardis supren kaj respondis samlingve.

— Kiuj ili estas, kaj kion ili diras? — demandis Gaja.

— Ili estas elfoj, — diris Sam. — Ĉu vi ne aŭdas iliajn voĉojn?

— Jes, ili estas elfoj, — diris Legolaso, — kaj ili diras, ke vi tiel laŭte spiras, ke ili povus vin mortpafi en mallumo. — Sam rapidis kovri mane sian buŝon. — Sed ili diras ankaŭ, ke ne necesas timi. Ili rimarkis nin jam delonge. Ili aŭdis mian voĉon trans Nimrodelo, kaj sciis, ke mi estas el ilia norda parencaro, kaj sekve ili ne malhelpis nian transiron, kaj poste ili aŭdis mian kanton. Nun ili petas, ke mi suprengrimpu kun Frodo, ĉar ŝajnas, ke ili informiĝis pri li kaj pri nia vojaĝo. La aliajn ili petas atendi iomete sub la arbo, ĝis ili decidos, kion fari.

El la ombroj malsupreniĝis eskalo; ĝi estis farita el ŝnuro, arĝentgriza kaj ekbrila en la mallumo, kaj kvankam ĝi aspektis gracila, ĝi pruviĝis sufiĉe forta por toleri multajn virojn. Legolaso kuris malpeze supren, kaj Frodo sekvis malrapide; malantaŭ li iris Sam, provante ne tro laŭte spiri. La branĉoj de la *malorno* elkreskis preskaŭ orte de la trunko, kaj poste svingiĝis supren; sed proksime al la supro la ĉeftrunko dispartiĝis al krono de multaj branĉoj, kaj inter tiuj ili trovis konstruitan lignan platformon, aŭ *fleton*, kiel oni nomis tiaĵojn en tiu epoko. La elfoj nomis ĝin *talano*. Oni atingis ĝin tra ronda centra truo, tra kiu pasis la eskalo.

Kiam Frodo finfine alvenis la *fleton*, li trovis Legolason sidanta kun tri aliaj elfoj. Ili estis vestitaj per ombreca grizo kaj ne estis videblaj inter la arbotrunkoj, krom se ili subite ekmoviĝis. Ili stariĝis, kaj unu el ili senkovriligis lampeton, kiu ellasis mallarĝan arĝentan radion. Li levis ĝin, rigardante la vizaĝojn de Frodo kaj Sam. Poste li forfermis denove la lumon kaj prononcis bonvenigajn vortojn en sia elfa lingvo. Frodo heziteme parolis reciproke.

— Bonvenon! — la elfo diris en la Lingvo Komuna, parolante malrapide. — Ni malofte uzas alian lingvon ol nian propran; ĉar ni loĝas nun en la arbarprofundo, kaj ne volonte traktas kun aliaj popoloj. Eĉ nia parencaro en la nordo estas fortranĉita de ni. Sed inter ni estas kelkaj, kiuj ankoraŭ eliras por gajni novaĵojn kaj spioni niajn malamikojn, kaj ili parolas aliajn lingvojn. Mi estas unu el ili. Haldiro estas mia nomo. Miaj fratoj, Rumilo kaj Orofino, malmulte scipovas vian lingvon.

» Sed ni aŭdis onidirojn pri via proksimiĝo, ĉar la kurieroj de Elrondo preterpasis Lorienon survoje hejmen laŭ la Dimrila ŝtuparo. Ni nenion aŭdis pri hobitoj, pri duonuloj, dum multaj jaroj, kaj ne sciis, ke ili plu loĝadas en Mez-Tero. Vi ne aspektas mise! Kaj pro tio, ke vi venas kun elfo el nia parencaro, ni estas pretaj trakti vin amike, laŭ la peto de Elrondo; kvankam ni ne kutime kondukas fremdulojn tra nia lando. Sed vi devas tranokti ĉi tie hodiaŭ. Kiom vi estas?

— Ok, — diris Legolaso. — Mi mem, kvar hobitoj, kaj du homoj, el kiuj unu, Aragorno, estas elf-amiko el la popolo de Okcidentio.

— La nomo de Aragorno, filo de Aratorno, estas konata en Lorieno, — diris Haldiro, — kaj li estas favorata de la Damo. Do ĉio en ordo. Sed vi ĝis nun parolis nur pri sep.

— La oka estas gnomo, — diris Legolaso.

— Gnomo! — diris Haldiro. — Tio ne estas en ordo. Ni ne traktis kun la gnomoj depost la Malhelaj Tagoj. Ili ne estas permesataj en nia lando. Mi ne povas permesi, ke li pasu.

— Sed li estas de la Soleca Monto, unu el la fidinduloj de Daino, kaj

amiko de Elrondo, — diris Frodo. — Elrondo mem elektis lin por esti unu el niaj kunuloj, kaj li estis kuraĝa kaj fidela.

La elfoj interparolis kune per mallaŭtaj voĉoj, kaj pridemandis Legolason propralingve.

— Do bone, — diris Haldiro fine. — Ni faros tion, kvankam ĝi estas kontraŭa al nia emo. Se Aragorno kaj Legolaso gardos lin, kaj respondecos pri li, li pasos; sed li devos trairi Lotlorienon kun la okuloj ŝirmitaj.

» Sed jam ne plu ni debatu. Viaj uloj devas ne resti surtere. Ni vaĉas la riverojn, de kiam ni vidis grandan trupon da orkoj iranta norden al Morio, laŭ la flankoj de l' montoj, antaŭ multaj tagoj. Lupoj ululas rande de l' arbaro. Se vi efektive venis de Morio, la danĝero ne povas esti malproksima. Morgaŭ frumatene vi devos pluiri.

» La kvar hobitoj grimpu ĉi tien kaj restu kun ni — ilin ni ne timas! Troviĝas alia *talano* en la najbara arbo. Tie la aliaj devas rifuĝi. Vi, Legolaso, respondecu pri ili. Voku min, se io ne estos en ordo! Kaj zorgu pri tiu gnomo!

Legolaso tuj malsupreniris laŭ la eskalo por sciigi la mesaĝon de Haldiro, kaj baldaŭ poste Gaja kaj Grinĉjo grimpis al la alta *fleto*. Ili estis spiromankaj kaj ŝajnis iom timigitaj.

— Jen! — diris Gaja anhelante. — Ni suprentrenis viajn lankovrilojn kiel ankaŭ niajn proprajn. Paŝegulo kaŝis la ceteron de niaj pakaĵoj en profunda foliamaso.

— Vi ja ne bezonis viajn ŝarĝaĵojn, — diris Haldiro. — Estas malvarme ĉe la arbosuproj vintre, kvankam la vento hodiaŭ vespere estas suda, sed ni havas por vi manĝaĵojn kaj trinkaĵojn, kiuj forpelos la noktofridon, kaj ni havas pli ol sufiĉe da feloj kaj manteloj.

La hobitoj akceptis ĉi tiun duan (kaj multe pli bonan) vespermanĝon tre volonte. Poste ili volvis sin varmige, ne nur en la felmanteloj de la elfoj, sed ankaŭ en la propraj lankovriloj, kaj provis endormiĝi. Sed malgraŭ la granda laceco nur Sam trovis tion facile farebla. Al hobitoj ne plaĉas alteco, kaj ili ne dormas en supra etaĝo, eĉ kiam ili disponas pri tio. La *fleto* tute ne konvenis al ili kiel dormoĉambro. Mankis al ĝi muroj, ne estis eĉ barilo; nur unuflanke estis malpeza plektita ekrano, kiun oni povis movi kaj fiksi diversloke laŭ la ventodirekto.

Grinĉjo plu parolis dum kelka tempo.

— Mi esperas, se mi efektive endormiĝos en tiu ĉi subtegmentejo por litoj, ke mi ne deruliĝos, — li diris.

— Post kiam mi sukcesos endormiĝi, — diris Sam, — mi daŭre dormos, ĉu aŭ ne mi deruliĝos. Kaj ju pli malmulte da parolo, des pli baldaŭ mi ekdormos, se vi min komprenas.

Frodo kuŝis maldorma dum kelka tempo, kaj alrigardis la stelojn ekbrilantajn tra la pala tegmento de tremetantaj folioj. Sam jam ronkis apude longe antaŭ ol li mem fermis siajn okulojn. Li povis malklare vidi la grizajn formojn de du elfoj sidantaj senmove kun la brakoj ĉirkaŭ la genuoj, kiuj interparolis flustre. La alia malsupreniris por sentineli sur unu el la pli subaj branĉoj. Finfine, lulate de la vento tra la branĉoj supre, kaj la dolĉa murmurado de la akvofalo Nimrodelo sube, Frodo endormiĝis kun la kanto de Legolaso eĥanta en lia menso.

Malfrunokte li vekiĝis. La aliaj hobitoj dormadis. La elfoj estis foririntaj. La falĉila luno malhele glimis inter la folioj. Mankis vento. Je ioma distanco li aŭdis krudan ridon kaj paŝadon de multaj piedoj sur la tero sube. Aŭdiĝis metala tintado. Tiuj sonoj malrapide forvelkis kaj ŝajnis iri suden, antaŭen en la arbaron.

Kapo subite enŝoviĝis tra la truo en la *fleto*. Frodo sidiĝis alarmite kaj vidis, ke tio estas grizkapuĉa elfo. Li alrigardis la hobitojn.

— Kio estas? — diris Frodo.

— *Yrch*! — diris la elfo per sibla flustro kaj ĵetis sur la *fleton* la volvitan ŝnureskalon.

— Orkoj! — diris Frodo. — Kion ili faras? — Sed la elfo jam foriris. Ne plu aŭdiĝis sonoj. Silentis eĉ la folioj, kaj la akvofalo mem ŝajnis mutigita. Frodo sidis tremante en siaj volvaĵoj. Li estis dankema, ke ili ne estis trafitaj sur la tero; sed li sentis, ke la arboj havigas malmulte da protektado, krom kaŝado. Orkoj estis entuziasmaj kiel dogoj spurante odorojn, oni diris, sed ili kapablis ankaŭ grimpi. Li elingigis Pikon: ĝi ekflametis kaj briletis kvazaŭ blua fajro; kaj poste velkis denove kaj malheliĝis. Malgraŭ la velko de lia glavo la sento pri proksima danĝero ne forlasis Frodon, ĝi eĉ kreskis. Li ekmoviĝis, rampis ĝis la truo kaj rigardis malsupren. Li estis preskaŭ certa, ke li aŭdas ŝtelmanierajn moviĝojn ĉe la arbosubo.

Ne temis pri elfoj, ĉar la arbara popolo kutimis moviĝi tute senbrue. Tiam li malklare aŭdis sonon snufsimilan; kaj io ŝajnis gratаĉi sur la ŝelo de l’ arbotrunko. Li fiksrigardis suben en la mallumon, retenante sian spiron. Io jam grimpis malrapide, kaj ĝia spirado aŭdiĝis kiel mallaŭta siblo tra kunpremitaj dentoj. Poste, supreniĝantaj proksime al la trunko, Frodo vidis du palajn okulojn. Ili haltis kaj rigardis supren senpalpebrume. Subite ili forturniĝis, kaj ombreca figuro ĉirkaŭglisis la arbotrunkon kaj malaperis.

Tuj poste Haldiro venis grimpante rapide supren tra l’ branĉaro.

— Sur la arbo estis io, kion mi neniam antaŭe vidis, — li diris. — Tio ne estis orko. Ĝi fuĝis tuj, kiam mi tuŝis la trunkon. Ĝi ŝajnis tre singarda, kaj iom sperta pri arboj, alie mi eble pensus, ke temas pri iu hobito.

» Mi ne pafis, ĉar mi ne volis kaŭzi kriadon: ni ne povas riski batalon. Ĵus pasis forta trupo da orkoj. Ili transiris Nimrodelon — malbenatu iliaj fiaj piedoj en ties pura akvo — kaj pluiris laŭ la malnova vojo apud la rivero. Ŝajnas, ke ili trafis iun spurodoron, kaj ili traserĉis la teron dum kelka tempo proksime al la loko, kie vi haltis. Ni triope ne povis defii centon, do ni antaŭeniris kaj parolis per ŝajnigitaj voĉoj, kondukante ilin en la arbaron.

» Orofino reiris haste al niaj loĝejoj por averti nian popolon. Neniu el la orkoj iam ajn reiros el Lorieno. Kaj multaj elfoj estos kaŝitaj ĉe la norda bordo antaŭ la sekva noktiĝo. Sed vi devos ekiri suden tuj post plena tagiĝo.

La tago venis pale el la oriento. La kreskanta lumo trafiltris la flavajn foliojn de l' *malorno*, kaj al la hobitoj ŝajnis, ke brilas la frua suno de friska somera mateno. Pale blua ĉielo gvatis inter la moviĝantaj branĉoj. Trarigardante breĉon je la suda flanko de la *fleto, Frodo vidis la tutan valon de Arĝentvejno kuŝanta kiel maro da novala oro svingiĝanta milde pro la venteto*.

La mateno estis ankoraŭ nova kaj malvarma kiam la Kunularo denove ekvojaĝis, gvidata nun de Haldiro kaj ties frato Rumilo.

— Adiaŭ, dolĉa Nimrodelo! — kriis Legolaso. Frodo retrorigardis kaj ekvidis brilon de blanka ŝaŭmo inter la grizaj arbotrunkoj.

— Adiaŭ, — li diris. Ŝajnis al li, ke li neniam denove aŭdos fluantan akvon tiom belan, eterne agordantan siajn sennombrajn notojn laŭ senfina ŝanĝiĝema muziko.

Ili reiris al la malnova pado je la okcidenta flanko de Arĝentvejno, kaj dum kelka tempo ili laŭiris ĝin suden. Sur la tero estis enpremaĵoj de orkaj piedoj. Sed baldaŭ Haldiro flankeniris inter la arbojn kaj haltis sur la riverbordo sub iliaj ombroj.

— Jen trans la rivereto staras iu el mia popolo, — li diris, — kvankam vi eble ne vidas lin. — Li eligis signalon kiel la malaltan fajfon de birdo, kaj el la densejo da junaj arboj paŝis elfo, grize vestita, sed kun la kapuĉo malantaŭen ŝovita; liaj haroj ekbrilis ore pro la matena sunlumo. Haldiro lerte ĵetis trans la akvon volvaĵon da griza ŝnuro, kaj li kaptis ĝin kaj ligis ĉirkaŭ arbo proksima al la bordo.

— Celebranto estas jam forta fluo ĉi tie, kiel vi vidas, — diris Haldiro, — ĝi fluas rapide kaj profunde, kaj ĝi estas tre malvarma. Ni ne enpaŝas ĝin tiom norde, krom se tio necesas. Sed dum ĉi tiuj tagoj singardemaj ni ne konstruas pontojn. Jen kiel ni transiras! Sekvu min! — Li ligis sian ŝnurfinon strikte ĉirkaŭ alia arbo, kaj poste kuris malpeze laŭlonge de ĝi, trans la riveron kaj returnen, kvazaŭ li estus sur vojo.

— Mi kapablas iri tiun vojon, — diris Legolaso; — sed la aliaj ne havas tiun lerton. Ĉu ili devos tranaĝi?

— Ne! — diris Haldiro. — Ni havas ankoraŭ du ŝnurojn. Ni ligos ilin unu super la alia, unu ŝultre alta, kaj alia duone alta, kaj tenante tiujn la fremduloj verŝajne povos transiri kun zorgo.

Kiam tiu gracila ponto estis starigita, la Kunularo transpasis, iuj singarde kaj malrapide, aliaj pli facile. El la hobitoj Grinĉjo pruviĝis la plej kapabla, ĉar li estis paŝocerta kaj transmarŝis rapide, tenante per nur unu mano; sed li daŭre rigardis la bordon antaŭe kaj ne subenrigardis. Sam trenpaŝis antaŭen, firme kroĉiĝinte, kaj rigardante suben en la palan ondiĝantan akvon kvazaŭ ĝi estus abismo en la montaro.

Li eligis spiron de malŝarĝo, kiam li estis sekure transiĝinta.

— Vivu kaj lernu! — kutimis diri mia Avulo. Kvankam li aludis ĝardenkultivadon, ne birdan stangsidadon, nek provon marŝi aranee. Eĉ mia onklo Anĉjo neniam entreprenis tian prestidigiton!

Kiam fine la tuta Kunularo grupiĝis sur la orienta bordo de Arĝentvejno, la elfoj malligis la ŝnurojn kaj volvis ilin. Rumilo, kiu restis sur la alia bordo, prenis unu, pendigis ĝin ĉe la ŝultro, kaj mane adiaŭinte foriris reen al Nimrodelo por sentineli.

— Nun, amikoj, — diris Haldiro, — vi eniris Naiton de Lorieno, aŭ la Daŭbon, kiel vi nomus ĝin, ĉar ĝi estas tereno, kiu kuŝas kiel lancopinto inter la brakoj de Arĝentvejno kaj Anduino la Granda. Ni permesas al neniuj fremduloj elspioni la sekretojn de Naito. Al tre malmultaj estas permesate eĉ enpaŝi tien. Kiel konsentite, mi ĉi tie ŝirmos la okulojn de la gnomo Gimlio. La aliaj rajtos marŝi senĝene dum kelka tempo, ĝis ni pliproksimiĝos al niaj loĝejoj, sube en Egladilo, en la Angulo inter la riveroj.

Tio tute ne plaĉis al Gimlio.

— La interkonsento estis starigita sen mia aprobo, — li diris. — Mi ne marŝos blindumite, kiel almozpetanto aŭ kaptito. Kaj spiono mi ne estas. Mia popolo neniam traktis kun iuj servantoj de l' Malamiko. Kiel ni ankaŭ ne damaĝis al la elfoj. Ne pli probable ol Legolaso aŭ iu alia el miaj kunuloj mi perfidos vin.

— Tion mi ne dubas, — diris Haldiro. — Tamen tia estas nia leĝo. Mi ne estas mastro de l' leĝoj, kaj tiun ne rajtas meti flanken. Mi jam faris multon, permesinte al vi ekpaŝi trans Celebranto.

Gimlio obstinis. Li disstarigis firme siaĵn piedojn, kaj metis manon al la tenilo de sia hakilo.

— Mi antaŭeniros senĝene, — li diris, — aŭ mi reiros por serĉi mian propran landon, kie mi estas konata kiel lojalulo, eĉ se mi pereos en la sovaĝejo.

— Vi ne povas reiri, — diris Haldiro severe. — Veninte tiel distance, vi

devas esti prezentita antaŭ la Sinjoro kaj la Damo. Ili juĝos vin, por vin teni aŭ doni al vi permeson, laŭ ilia volo. Vi ne povas transiri denove la riverojn, kaj malantaŭ vi estas nun sekretaj sentineloj, kiujn vi ne povas preterpasi. Vi estus mortigita antaŭ ol vi vidus ilin.

Gimlio elzonigis sian hakilon. Haldiro kaj lia kunulo strecîs siajn pafarkojn.

— Peston al gnomoj kaj ties obstineco! — diris Legolaso.

— Atentu! — diris Aragorno. — Se mi plu estras tiun ĉi Kunularon, vi devas obei miajn ordonojn. Estas severe al la gnomo, ke oni tiel izolas lin. Ni ĉiuj estu blindumitaj, eĉ Legolaso. Tio estos pli bona, kvankam ĝi malrapidigos kaj enuigos la vojaĝon.

Gimlio subite ekridis.

— Ni aspektos kiel ridinda trupo da stultuloj! Ĉu Haldiro gvidos nin per fadeno, kiel multajn blindajn almozpetantojn kun unusola hundo? Sed mi estos kontenta, se nur tiu Legolaso same kiel mi estos blindumita.

— Mi estas elfo kaj parenca ĉi tie, — diris Legolaso, siavice koleriĝante.

— Jam ni kriu: "peston al la obstineco de elfoj!" — diris Aragorno. — Sed en la Kunularo ĉiuj faros same. Ek, ŝirmu niajn okulojn, Haldiro!

— Mi pretendos plenan kompenson por ĉiu stumblo kaj kontuzita piedfingro, se vi ne kondukos zorge, — diris Gimlio, kiam oni ĉirkaŭvolvis liajn okulojn per drapaĵo.

— Via pretendo ne praviĝos, — diris Haldiro. — Mi kondukos vin zorge, kaj la padoj estas glataj kaj rektaj.

— Ve pro la stulteco de l' nuna epoko! — diris Legolaso. — Ĉi tie ĉiuj estas malamikoj de la unusola Malamiko, kaj tamen mi devas marŝi blinde, dum gajas la suno en la arbaro sub oraj folioj!

— Stulteco tio eble ŝajnas, — diris Haldiro. — Efektive nenie montriĝas pli klare la potenco de l' Malhela Mastro ol en la suspektemo, kiu disigas tiujn, Muj ankoraŭ kontraŭstaras lin. Tamen tiom malmulte da fido kaj konfido ni jam trovas en la mondo ekster Lotlorieno, krom eble en Rivendelo, ke ni ne kuraĝas pro nia propra fidemo endanĝerigi nian landon. Ni vivas nun sur insulo inter multaj danĝeroj, kaj niaj manoj jam tuŝas pli ofte pafarkon ol harpon.

» Longe defendis nin la riveroj, sed ili ne plu estas certa barilo, ĉar la Ombro jam rampis norden por ĉie ĉirkaŭi nin. Iuj parolas pri foriro, tamen tio jam ŝajnas tro malfrua. La montoj okcidente iĝas misaj; oriente la tereno estas dezerta kaj plena je l' kreitaĵoj de Saŭrono, kaj oni diras, ke ni jam ne povas pasi sendanĝere suden tra Rohano, kaj la elfluejoj de l' Granda Rivero estas gardataj de l' Malamiko. Eĉ se ni povus alveni la bordojn de la

Maro, ni ne plu trovus ŝirmejon tie. Oni diras, ke ankoraŭ troviĝas havenoj de l' Altaj Elfoj, sed tiuj estas malproksime norde kaj okcidente, post la lando de la Duonuloj. Sed kie tio estas, kvankam eble scias la Sinjoro kaj la Damo, mi ne scias.

— Vi devus almenaŭ konjekti pro tio, ke vi vidis nin, — diris Gaja. — Ekzistas elfaj havenoj okcidente de mia lando, la Provinco, kie hobitoj vivas.

— Feliĉaj estas hobitoj, kiuj loĝas proksime al la bordoj de l' maro! — diris Haldiro. — Vere, jam de tre longe mia popolo ne rigardis ĝin, tamen ni ankoraŭ rememoras ĝin en kantoj. Rakontu al mi pri tiuj havenoj dum ni marŝas.

— Mi ne povas, — diris Gaja. — Mi neniam vidis ilin. Mi neniam antaŭe forlasis mian landon. Kaj se mi scius, kia estas la mondo ekstere, al mi ŝajnas, ke mi ne trovus kuraĝon por ĝin forlasi.

— Eĉ ne por vidi belan Lotlorienon, ĉu? — diris Haldiro. — La mondo ja estas danĝeroplena, kaj en ĝi estas multaj mallumaj lokoj; sed ankoraŭ troviĝas multo, kio estas bela, kaj kvankam en ĉiuj landoj la amo nun miksiĝas kun malĝojo, ĝi eble plifortiĝas.

» Ĉe ni estas iuj, kiuj kantas, ke la Ombro retiriĝos kaj la paco revenos. Sed mi ne kredas, ke la mondo ĉirkaŭanta nin iam estos denove tia, kia ĝi estis pratempe, aŭ la lumo de l' suno kia antaŭe. Por la elfoj, mi timas, ĝi pruviĝos en la plej bona okazo iu militpaŭzo, dum kiu ili povos foriri ne malhelpate ĝis la maro kaj forlasi por ĉiam la Mez-Teron. Ve pro Lotlorieno, kiun mi amas! Malgaja estus vivo en lando, kie ne kreskas *malornoj*. Sed neniu raportis, ke troviĝas *malornoj* trans la Granda Maro.

Tiel parolante, la Kunularo spaliris malrapide laŭ la padoj en la arbaro, gvidate de Haldiro, dum la alia elfo marŝis malantaŭe. Ili sentis la teron glata kaj mola sub la piedoj, kaj post kelka tempo ili marŝis pli senhezite, ne timante vundiĝon aŭ falon. Senigite je vidkapablo, Frodo konstatis, ke pliakriĝis lia aŭdkapablo kaj aliaj sentumoj. Li povis flari la arbojn kaj la surpaŝitan herbon. Li povis aŭdi multajn diversajn notojn en la susurado de l' folioj superkape, la murmurantan riveron je lia dekstro, kaj la maldensajn klarajn voĉojn de birdoj en la ĉielo. Li sentis la sunon sur siaj vizaĝo kaj manoj, kiam ili trapasis maldensejon.

Tuj kiam li surpaŝis la kontraŭan bordon de Arĝentvejno li spertis strangan senton, kaj tio pliprofundiĝis kiam li marŝis antaŭen en Naiton: ŝajnis al li, ke li transiris tempoponton en angulon de la Praaj Tagoj, kaj nun promenas en mondo, kiu ne plu ekzistas. En Rivendelo estis memoro pri antikvaj aferoj; en Lorieno la antikvaĵoj pluvivadis en la ekzistanta mondo. Miseco estis tie vidita kaj aŭdita, malĝojo estis spertita; la elfoj timis kaj

malfidis la mondon eksteran: lupoj ululis rande de l' arbaro, sed sur la lando Lorieno kuŝis neniu ombro.

Dum la tuta tago la Kunularo antaŭen marŝis, ĝis ili sentis alvenon de l' friska vespero kaj aŭdis la fruan noktoventon flustri inter multaj folioj. Tiam ili ripozis kaj dormis sentime sur la tero, ĉar iliaj gvidantoj ne permesis al ili malkovri la okulojn, kaj ili ne povis grimpi. Matene ili pluiris, marŝante senrapideme. Je tagmezo ili haltis, kaj Frodo konstatis, ke ili senkonsciiĝis sub la brila suno. Subite li aŭdis sonon de multaj voĉoj ĉirkaŭe.

Marŝinta elf-amaso alvenis silente: ili rapidis al la nordaj landlimoj por gardi kontraŭ eventuala atako el Morio, kaj ili kunportis novaĵojn, kiujn Haldiro parte raportis. La invadintaj orkoj estis embuskitaj kaj preskaŭ ĉiuj detruitaj; la restaĵo estis faĝinta okcidenten al la montoj, kaj estis persekutata. Ankaŭ stranga kreaĵo estis vidita, kuranta kurbdorse kaj kun manoj proksimaj al la tero, kiel besto, tamen ne bestforma. Ĝi evitis kaptiĝon, kaj ili ne pafis ĝin, ne sciante ĉu ĝi estas bona aŭ misa, kaj ĝi malaperis suden laŭ Arĝentvejno.

— Cetere, — diris Haldiro, — ili kunportis mesaĝon de la Sinjoro kaj Damo de Galadrimoj. Vi rajtas ĉiuj marŝi libere, eĉ la gnomo Gimlio. Ŝajnas, ke la Damo scias, kiu kaj kio estas ĉiu ano de via Kunularo. Eble novaj sciigoj venis el Rivendelo.

Li forigis la bandaĝon unue de la okuloj de Gimlio.

— Vian pardonon! — li diris, profunde riverencante. — Rigardu nin jam per amikecaj okuloj! Rigardu kaj ĝoju, ĉar vi estas la unua gnomo, kiu vidis la arbojn de Naito de Lorieno depost la epoko de Durino!

Kiam liaj okuloj estis malkovritaj, Frodo suprenrigardis kaj retenis la spiron. Ili staris en libera spaco. Maldekstre staris granda teramaso, kovrita de herbrazeno tiel verda kiel la printempo dum la Praaj Tagoj. Sur ĝi, kvazaŭ duobla krono, kreskis du arbocirkloj: la eksteraj havis ŝelojn el neĝa blanko, kaj estis senfoliaj, sed belis en la graciforma nudo; la internaj estis *malornoj* tre altaj, ankoraŭ mantelitaj je pala oro. Alte inter la branĉoj de tureca arbo, kiu staris meze de ĉiuj, ekbrilis blanka *fleto. Sube de la arboj, kaj ĉirkaŭ sur la deklivoj*, la herbo estis trapunktita de oraj floretoj stelformaj. Inter ili, kapopendole sur gracilaj tigoj, estis aliaj floroj, blankaj kaj plej pale verdaj: ili trembrilis nebulece sur la bunta verdo de la herbo. Super la tuto bluis la ĉielo, kaj la suno posttagmeza ardis sur la monteto kaj ĵetis longajn verdajn ombrojn inter la arbojn.

— Vidu! Vi alvenis ĝis Cerino Amroto, — diris Haldiro. — Jen estas la kerno de l' antikva regno, kia ĝi estis antaŭ longe, kaj jen estas la teramaso de Amroto, kie estis konstruita dum tagoj pli feliĉaj lia alta domo. Ĉi tie ĉiam paradas la vintraj floroj en la senvelka herbo: la flava *elanoro* kaj la

pala *nifredilo*. Ĉi tie ni restos kelkan tempon kaj atingos la urbon de Galadrimoj en la krepusko.

La aliaj falis sur la bonodoran herbon, sed Frodo staris provizore ankoraŭ mirfrapita. Ŝajnis al li, ke li trapasis altan fenestron, kiu alrigardas mondon malaperintan. Banis ĝin lumo, pri kiu lia lingvo ne posedis nomon. Ĉio, kion li vidis, estis belforma, sed la formoj ŝajnis samtempe freŝfaritaj, kvazaŭ ili estis origine konceptitaj kaj desegnitaj ĝuste kiam oni malkovris liajn okulojn, kaj antikvaj, kvazaŭ ili jam ekzistis eterne. Li vidis neniun koloron krom tiuj, kiujn li konis, oron kaj blankon kaj bluon kaj verdon, sed ili estis freŝaj kaj korŝiraj, kvazaŭ li tiumomente la unuan fojon rimarkus ilin kaj kreus por ili nomojn novajn kaj mirindajn. Vintre ĉi tie neniu koro povis funebri pro la somero aŭ printempo. Neniu malperfektaĵo, malsano aŭ deformaĵo estis videbla en io ajn, kio kreskis sur la tero. Sur la lando Lorieno estis neniu makulo. Li turnis sin kaj vidis, ke Sam nun staras apude, ĉirkaŭrigardante kun konfuzita esprimo, kaj frotante siajn okulojn kvazaŭ li ne estus certa, ke li estas maldorma.

— Estas sunlume kaj heltage, efektive, — li diris. — Mi supozis, ke elfoj preferas lunon kaj stelojn: sed tio ĉi estas pli elfeca ol io ajn, pri kiu mi aŭdis. Mi sentas, kvazaŭ mi estus *interne* de kanto, se vi min komprenas.

Haldiro alrigardis ilin, kaj li fakte ŝajnis kompreni tiel la penson kiel la vortojn. Li ridetis.

— Vi sentas la potencon de l' Damo de Galadrimoj, — li diris. — Ĉu plaĉos al vi grimpi kun mi al Cerino Amroto?

Ili sekvis lin kiam li paŝis leĝere supren laŭ la herbvestitaj deklivoj. Kvankam li marŝis kaj spiris, kaj ĉirkaŭ li vivajn foliojn kaj florojn movetigis la sama malvarmeta vento, kiu ventolis lian vizaĝon, Frodo sentis, ke li estas en lando sentempa, kiu nek velkas nek ŝanĝiĝas nek iĝas neglektema. Kiam li foriros kaj pasos denove en la eksteran mondon, Frodo, la vagulo el la Provinco, plu promenos tie, sur la herbo inter *elanoroj* kaj *nifrediloj* en bela Lotlorieno.

Ili eniris la cirklon de blankaj arboj. Dum ili tion faris, la suda vento blovis al Cerino Amroto kaj suspiris inter la branĉoj. Frodo staris senmove, aŭdante en malproksimo grandajn marojn sur strandoj, kiuj estis antaŭlonge forvišitaj, kaj mirantajn marbirdojn, kies genro estis malaperinta de la tero.

Haldiro estis irinta antaŭen kaj nun grimpis al la alta *fleto*. Kiam Frodo prepariĝis sekvi lin, li metis sian manon sur la arbon apud la eskalo: neniam antaŭe li tiel subite kaj tiel klare konstatis la senton kaj supraĵon de arba haŭto kaj la interna vivo. Li spertis plezuron pri ligno kaj ties tuŝimpreso, nek kiel arbaristo, nek kiel ĉarpentisto; tio estis plezuro pri la vivanta arbo mem.

Kiam li fine surpaŝis la altan platformon, Haldiro kaptis lian manon kaj turnis lin al la sudo.

— Unue rigardu tiudirekten! — li diris.

Frodo rigardis kaj vidis, ankoraŭ iom malproksime, monteton kun multaj fortikaj arboj, aŭ urbon kun verdaj turoj: kiun el ili li ne povis decidi. Ŝajnis al li, ke el ĝi venis tiuj potenco kaj lumo, kiuj regis la tutan landon. Li subite sopiris birde flugi kaj alteriĝi en la verda urbo. Poste li rigardis orienten kaj vidis la tutan landon Lorieno malsupreniranta ĝis la pala ekbrilo de Anduino, la Granda Rivero. Li levis siajn okulojn trans la rivero kaj estingiĝis la tuta lumo, kaj li troviĝis denove en sia konata mondo. Trans la rivero la tereno ŝajnis plata kaj malplena, senforma kaj malpreciza, ĝis en la malproksimo ĝi leviĝis denove kiel muro, malhela kaj morna. La suno bananta Lotlorienon malhavis potencon lumigi la ombron de tiu fora altaĵo.

— Tie kuŝas la fortikaĵo de Suda Mornarbaro, — diris Haldiro. — Ĝi estas vestita per arbaro da malhelaj abioj, kie la arboj luktas unu kontraŭ

aliaj kaj iliaj branĉoj putras kaj velkas. Meze sur ŝtona altaĵo staras Dol Gulduro, kie la Malamiko longe havis sian loĝejon. Ni timas, ke tiu estas denove loĝata, kaj kun sepobla potenco. Lastatempe ĝin ofte kovris nigra nubo. De ĉi tiu alta loko vi povas vidi la du potencojn, kiuj oponas unu la alian; kaj ĉiam ili nun pense luktas, sed kvankam unuflanke la lumo perceptas la koron mem de la mallumo, ĝia propra sekreto ne estas malkaŝita. Ankoraŭ ne. — Li turnis sin kaj rapide suben grimpis, kaj ili sekvis lin.

Ĉe l' subo de la monteto Frodo trovis Aragornon, kiu staris senmova kaj silenta kiel arbo; sed en lia mano estis eta ora floro *elanoro*, kaj liaj okuloj lumis. Lin envolvis iu bela memoro, kaj kiam Frodo alrigardis lin, li sciis, ke li vidas aferojn, kiuj estis iam en tiu ĉi sama loko. Ĉar la malfacilaj jaroj estis forigitaj de sur la vizaĝo de Aragorno, kaj li ŝajnis blankvestita, juna princo altkreska kaj bela; kaj li parolis vortojn en la elfa lingvo al iu, kiun Frodo ne povis vidi.

— *Arwen vanimalda, namárië*! — li diris, poste profunde enspiris kaj reveninte el sia pensado alrigardis Frodon kaj ridetis. — Jen estas la kerno de l' Elfregno sur la tero, — li diris, — kaj ĉi tie loĝas mia koro ĉiam, krom se estas iu lumo post la malhelaj vojoj, kiujn ni devos ankoraŭ paŝi, vi kaj mi. Venu kun mi!

Kaj preninte manon de Frodo li forlasis la monteton de Cerino Amroto kaj neniam plu revenis tien kiel vivanto.

7

La Spegulo de Galadriela

La suno estis subiranta malantaŭ la montojn, kaj la ombroj profundiĝis, kiam ili denove ekiris. Ilia pado nun eniris densejojn, kie la krepusko jam estiĝis. Nokto alvenis sub la arboj dum ili marŝis, kaj la elfoj malkovris siajn arĝentajn lampojn.

Subite ili denove eliris en apertejon kaj trovis sin sub pala vespera ĉielo, punktita de kelkaj fruaj steloj. Antaŭ ili estis larĝa senarba spaco, etendiĝanta laŭ granda cirklo kaj forkurbiĝanta ambaŭflanke. Ĝi finiĝis per profunda fosaĵo perdita en mola ombro, sed la herbo ĉe ĝia rando estis verda, kvazaŭ ĝi ardus ankoraŭ memorante pri la foririnta suno. Aliflanke leviĝis ĝis granda alto verda muro ĉirkaŭanta verdan monteton kovritan de *malornoj* pli altkreskaj ol iuj, kiujn ili jam vidis en la tuta lando. Ties altecon oni ne povis konjekti, tamen ili staris rekte en la krepusko kvazaŭ vivantaj turoj. Inter iliaj multnivelaj branĉoj kaj iliaj ĉiammoviĝaj folioj brilis sennombraj lumoj, verdaj, oraj kaj arĝentaj. Haldiro sin turnis al la Kunularo.

— Bonvenon al Karas Galadono! — li diris. — Ĉi tie estas la urbo de Galadrimoj, kie loĝas Celeborno la Sinjoro kaj Galadriela la Damo de Lorieno. Sed ni ne povos eniri ĉi tie, ĉar la pordego ne frontas norden. Ni devos ĉirkaŭiri ĝis la suda flanko, kaj la vojo ne estas mallonga, ĉar la urbo estas granda.

Vojo pavimita per blankaj ŝtonoj etendiĝis laŭ la ekstera rando de l' fosaĵo. Laŭ ĝi ili iris okcidenten, kun la urbo ĉiam grimpanta supren, kvazaŭ verda nubo maldekstre de ili; kaj dum la nokto pliprofundiĝis, ekaperis pliaj lumoj, ĝis la monteto ŝajnis flamanta pro steloj. Ili alvenis finfine blankan ponton, kaj transirinte trovis la grandan pordegon de la urbo: tiu frontis sud-okcidenten, metita inter la finoj de la ĉirkaŭa muro, kiuj ĉi tie imbrikiĝis, kaj tiuj estis altaj kaj fortaj kaj ornamitaj per multaj lampoj.

Haldiro frapis kaj parolis, kaj la pordego malfermiĝis sensone, sed pri gardistoj Frodo povis vidi neniun indikon. La vojaĝantoj eniris, kaj la pordego fermiĝis malantaŭ ili. Ili troviĝis en mallarĝa pasejo inter la murofinoj. Rapide trapasinte ĝin, ili eniris la urbon de l' arboj. Ili vidis neniun, nek aŭdis paŝojn sur la padoj, sed aŭdiĝis multaj voĉoj, ĉirkaŭe kaj en la aero supre. Malproksime, supre sur la monteto, ili aŭdis kantadon, kiu

elaltiĝis kvazaŭ milda pluvo sur foliojn.

Ili laŭiris multajn padojn kaj grimpis multajn ŝtuparojn, ĝis ili atingis la altejojn kaj vidis antaŭ si meze de larĝa gazono fontanon trembrilantan. Ĝin lumigis arĝentaj lampoj, kiuj svingiĝis sur branĉoj de l' arboj, kaj ĝi enfalis arĝentan basenon, el kiu transrandis blanka rojo. Je la suda flanko de la gazono staris la plej grandioza el ĉiuj arboj. Ĝia glata trankego glimis kiel griza silko, kaj ĝi baŭmis, ĝis kie la unuaj branĉoj, fore supre, malfermis siajn membregojn sub ombrecaj nuboj da folioj. Apud ĝi staris larĝa blanka eskalo, kaj ĉe la subo sidis tri elfoj. Ili saltleviĝis kiam la vojaĝantoj proksimiĝis, kaj Frodo vidis, ke ili estas altaj kaj vestitaj per grizaj maŝkirasoj, kaj de sur la ŝultroj pendis longaj blankaj manteloj.

— Ĉi tie loĝas Celeborno kaj Galadriela, — diris Haldiro. — Ili deziras, ke vi supreniru por interparoli kun ili.

Unu el la gardistoj blovis klaran noton per korneto, kaj ĝi estis respondita trifoje de la fora supro.

— Mi iros la unua, — diris Haldiro. — Frodo sekvu poste kun Legolaso. La aliaj rajtas sekvi laŭvole. Ĝi estas longa grimpo por tiuj, kiuj ne kutimiĝis al tiaj ŝtuparoj, sed vi rajtas ripozi survoje.

Grimpante malrapide, Frodo preterpasis multajn *fletojn*: iuj je unu flanko, iuj je alia, kaj iuj metitaj ĉirkaŭ la arbotrunko, tiel ke la eskalo trapasis ilin. Je granda alteco super la tero li alvenis al larĝa *talano*, kvazaŭ ferdeko de ŝipego. Sur ĝi estis konstruita domo, tiom granda, ke surtere ĝi preskaŭ sufiĉus por halo de homoj. Li eniris malantaŭ Haldiro, kaj trovis sin en ovalforma ĉambro, meze de kiu kreskis la trunko de l' granda *malorno*, jam pintiĝanta al sia verto, kaj tamen ankoraŭ formanta pilastron larĝrondan.

La ĉambregon plenigis malkruda lumo; ĝiaj muroj estis verdaj kaj arĝentaj, kaj ĝia tegmento estis ora. Multaj elfoj sidis tie. Sur du seĝoj apud la arbotrunko kun baldakeno el viva branĉo sidis unu apud la alia Celeborno kaj Galadriela. Ili stariĝis por saluti siajn gastojn, laŭ kutimo de la elfoj, eĉ tiuj, kiujn oni taksis potencaj reĝoj. Tre altaj ili estis, kaj la Damo ne malpli ol la Sinjoro; kaj ili estis seriozmienaj kaj belaj. Ili estis vestitaj tute per blankaĵo: la haroj de l' Damo estis profunde oraj, kaj la haroj de Sinjoro Celeborno estis arĝentaj, longaj kaj helaj; sed vidiĝis ĉe ili neniu indiko pri maljuniĝo, krom eble funde de l' okuloj; ĉar tiuj estis akraj kiel lancoj en la stellumo, kaj tamen profundaj, la putoj de profundaj memoroj.

Haldiro kondukis Frodon antaŭ ilin, kaj la Sinjoro bonvenigis lin en lia propra lingvo. Neniun vorton diris Damo Galadriela, tamen longe rigardis lian vizaĝon.

— Sidiĝu nun apud mia seĝo, Frodo el la Provinco! — diris Celeborno.

— Kiam alvenos ĉiuj, ni interparolos.

Ĉiun el la kunuloj li salutis ĝentile laŭnome, kiam ili envenis.

— Bonvenon, Aragorno, filo de Aratorno! — li diris. — Pasis ok plus tridek jaroj laŭ la mondo ekstera de kiam vi alvenis tiun ĉi landon; kaj tiuj jaroj tre pezas al vi. Sed la fino proksimiĝas, ĉu bona ĉu malbona. Ĉi tie metu flanken provizore vian ŝarĝon!

» Bonvenon, filo de Tranduilo! Tro malofte vojaĝas ĉi tien miaj parencoj el la nordo.

» Bonvenon Gimlio, filo de Gloino! Jam de treege longe ni ne vidis iun el la Durina popolo en Karas Galadono. Sed hodiaŭ ni flankenmetis nian longdaŭran leĝon. Tio estu signo, ke, kvankam la mondo nuntempe malhelas, pli bonaj tagoj proksimiĝas, kaj ke amikeco renoviĝos inter niaj gentoj.

Gimlio profunde riverencis.

Kiam ĉiuj gastoj eksidis antaŭ lia seĝo, la Sinjoro rigardis ilin denove.

— Ĉi tie estas ok, — li diris. — Naŭ devis eliri: tion anoncis la raportoj. Sed eble okazis ia ŝanĝo, pri kiu ni ne aŭdis. Elrondo estas malproksima, kaj mallumo kolektiĝas inter ni, kaj la tutan jaron plilongiĝis la ombroj.

— Ne, ne okazis ŝanĝo, — diris Damo Galadriela, la unuan fojon parolante. Ŝia voĉo estis klara kaj muzika, sed pli basa ol kutime ĉe virinoj. — Gandalfo la Griza ekvojaĝis kun la Kunularo, sed li ne transiris la limojn de tiu ĉi lando. Nun diru al ni, kie li estas, ĉar mi multe deziras interparoli kun li denove. Sed lin mi ne povas vidi de malproksime, krom se li eniras tra la bariloj de Lotlorieno: griza nebuleto ĉirkaŭis lin, kaj la vojoj de liaj piedoj kaj lia menso estas kaŝitaj al mi.

— Ve! — diris Aragorno. — Gandalfo la Griza falis en ombron. Li restis en Morio kaj ne eskapis.

Pro tiuj vortoj ĉiuj elfoj en la halo laŭte ekkriis pro malĝojo kaj mirego.

— Jen malbona novaĵo, — diris Celeborno, — la plej misa, kiu estas eldirita ĉi tie dum longaj jaroj plenaj de malbonaj faroj. — Li turnis sin al Haldiro. — Kial mi ne estis pli frue informita pri tio ĉi? — li demandis elf-lingve.

— Ni nenion diris al Haldiro pri niaj faroj aŭ nia celo, — diris Legolaso. — Unue ni estis tro lacaj kaj danĝero sekvis nin tro proksime; kaj poste ni preskaŭ forgesis nian malĝojon por kelka tempo, dum ni marŝis feliĉe laŭ la belaj padoj de Lorieno.

— Tamen mia malĝojo estas granda, kaj nia perdo ne povas restaŭriĝi, — diris Frodo. — Gandalfo estis nia gvidanto, kaj li kondukis nin tra Morio; kaj kiam nia eskapo ŝajnis neebla li savis nin, kaj li pereis.

— Rakontu jam la tutan historion! — diris Celeborno.

Tiam Aragorno rakontis ĉion, kio okazis sur la pasejo de Karadraso kaj dum la sekvintaj tagoj; kaj li parolis pri Balino kaj ties libro, kaj la batalo en la Ĉambro de Mazarbulo, kaj la fajro, kaj la mallarĝa ponto, kaj la alveno de l' Teruro.

— Misaĵo el la Antikva Mondo ĝi ŝajnis, tia, kian mi neniam antaŭe vidis, — diris Aragorno. — Ĝi estis samtempe ombro kaj flamo, forta kaj timiga.

— Ĝi estis balrogo de Morgoto, — diris Legolaso, — el ĉiuj elfaj plagoj, la plej timinda, krom tiu, kiu sidas en la Malhela Turo.

— Efektive mi vidis sur la ponto tion, kio hantas niajn plej malhelajn sonĝojn, mi vidis la Plagon de Durino, — diris Gimlio per mallaŭta voĉo, kaj en liaj okuloj staris teruro.

— Ve! — diris Celeborno. — Ni delonge timas, ke sub Karadraso dormas teruraĵo. Sed se mi scius, ke la gnomoj denove vekis tiun misaĵon en Morio, mi malpermesus al vi transpason de l' norda limo, vi kaj ĉiuj, kiuj akompanas vin. Kaj se tio estus ebla, oni dirus, ke fine Gandalfo falis el saĝo en malsaĝon, enirinte senbezone la reton de Morio.

— Tiu estus malprudenta fakte, kiu dirus tion, — diris Galadriela severe. — Senbezona estis neniu el la faroj de Gandalfo. Tiuj, kiuj sekvis lin ne konis lian menson kaj ne povas raporti pri lia plena intenco. Sed kiel ajn estas pri la gvidinto, la sekvintoj ne kulpas. Ne bedaŭru vian bonvenigon de la gnomo. Se nia gento estus longe ekzilita kaj malproksime de Lotlorieno, kiu el Galadrimoj, eĉ Celeborno la Saĝa, povus preterpasi kaj ne volus rigardi sian antikvan hejmon, eĉ se ĝi fariĝus loĝejo de drakoj?

» Malhelas la akvo de Ĥeled-Zaramo, kaj fridas la fontoj de Kibil-Nalao, kaj belaj estis la multpilastraj haloj de Ĥazad-Dumo en la Praaj Tagoj antaŭ la falo de potencaj reĝoj sub la ŝtonon.

Ŝi alrigardis Gimlion, kiu sidis malkontente trista, kaj ŝi ridetis. Kaj la gnomo, aŭdinte la nomojn proponcitaj per sia propra antikva lingvo, rigardis supren kaj trafis ŝiajn okulojn; kaj ŝajnis al li, ke li subite enrigardis la koron de malamiko kaj vidis en ĝi amon kaj komprenon. Miro esprimiĝis sur lia vizaĝo, kaj poste li ridetis reciproke.

Li stariĝis malglate kaj riverencis laŭ la gnoma maniero, dirante:

— Tamen pli bela estas la viva lando Lorieno, kaj Damo Galadriela superas ĉiujn gemojn, kiuj kuŝas sub la tero!

Sekvis silento. Poste Celeborno denove ekparolis.

— Mi ne sciis, ke via situacio estis tiom misa. Gimlio forgesu miajn severajn vortojn: mi parolis kun zorgo en la koro. Mi faros mian plejeblon por helpi vin, ĉiun laŭ lia deziro kaj bezono, sed precipe tiun el la etuloj, kiu portas la ŝarĝon.

— Via celo estas konata al ni, — diris Galadriela, alrigardante Frodon. — Sed ni ne parolos pri ĝi pli malkaŝe ĉi tie. Sed eble pruviĝos ne vane, ke vi alvenis tiun ĉi landon serĉante helpon, kiel Gandalfo mem klare intencis. Ĉar la Sinjoro de Galadrimoj estas taksata la plej saĝa el la elfoj de Mez-Tero, kaj donanto de donacoj super la kapablo de reĝoj. Li loĝadis en la Okcidento ekde l' aŭroraj tagoj, kaj mi loĝadis kun li dum jaroj nekalkuleblaj: ĉar antaŭ la pereo de Nargotrondo kaj Gondolino mi transpasis la montojn, kaj kune dum epokoj de l' mondo ni kontraŭstaris la longan malvenkon.

» Estis ĝuste mi, kiu kunvokis la Blankan Konsilion. Kaj se miaj intencoj ne malsukcesus, ĝin eble regus Gandalfo la Griza, kaj tiuokaze eble la aferoj elfalus alie. Sed eĉ nun restas iom da espero. Mi ne konsilos vin, dirante faru tion, aŭ faru tion ĉi. Ĉar ne per farado aŭ aranĝado, nek per elekto inter tiu plano kaj alia mi kapablas utili; sed nur per scio pri tio, kio estis kaj estas, kaj parte ankaŭ kio estos. Sed tion ĉi mi diras al vi: via Celo staras sur tranĉila eĝo. Se vi devios nur iomete, ĝi malsukcesos, kaj ruiniĝos ĉiuj. Tamen espero restas dum la tuta Kunularo estas lojala.

Dirinte tion, ŝi tenis ilin per la okuloj, kaj silente rigardis esplore ĉiun el ili laŭvice. Neniu krom Legolaso kaj Aragorno povis longe toleri ŝian rigardon. Sam tuj ruĝiĝis kaj pendigis sian kapon. Finfine Damo Galadriela okule liberigis ilin, kaj ridetis:

— Ne zorgigu viajn korojn, — ŝi diris. — Ĉi-nokte vi dormos trankvile. — Tiam ili suspiris kaj spertis subite lacon, kiel tiuj, kiuj estas demanditaj longe kaj profunde, kvankam neniu vorto estis malkaŝe parolita.

— Iru nun! — diris Celeborno. — Vi estas elĉerpitaj pro malĝojo kaj multe da peno. Eĉ se via Celo ne koncernus nin proksime, vi rajtus trovi refuĝon en tiu ĉi urbo, ĝis vi estus kuracitaj kaj refreŝigitaj. Nun vi ripozos, kaj dum kelka tempo ni ne parolos pri via pluirado.

Tiunokte la Kunularo dormis sur la tero, kio multe kontentigis la hobitojn. La elfoj etendis por ili pavilonon inter la arboj proksime al la fontano, kaj en ĝi ili metis molajn kanapojn; poste, dirante pacvortojn per belaj elfaj voĉoj, ili forlasis ilin. Dum iomete da tempo la vojaĝintoj priparolis la antaŭan nokton sur la arbosuproj, la tagan vojaĝon, la Sinjoron kaj Damon, ĉar ili ankoraŭ ne kuraĝis pli retrorigardi.

— Kial vi ruĝiĝis, Sam? — diris Grinĉjo. — Vi baldaŭ submetiĝis. Oni povus supozi, ke via konscienco sentas kulpon. Espereble tio ne estis pli malbona ol komploto ŝteli unu el miaj litkovriloj.

— Pri io tia mi ne pensis, — respondis Sam, kies humoro ne estis ŝercema. — Se vi volas scii, mi sentis min kvazaŭ nuda, kaj tio ne plaĉis al mi. Ŝi ŝajnis rigardi en mian internon kaj demandi, kion mi farus, se ŝi

ebligus al mi reflugi hejmen al la Provinco ĝis komforta trueto kun — kun iom da propra ĝardeno.

— Strange, — diris Gaja. — Preskaŭ tion mi mem sentis; nur, nur tamen, mi eble diros nenion pli, — li finis lame.

Ĉiu el ili, verŝajne, spertis same: ĉiu sentis, ke al li estas proponata elekto inter timoplena ombro, kiu atendas antaŭe, kaj io, kion li treege deziras: klare antaŭ ilia menso kuŝis tio, kaj por ĝin ricevi necesis nur, ke li forturniĝu de la vojo kaj lasu al aliaj la Celon kaj la militon kontraŭ Saŭrono.

— Kaj ŝajnis al mi ankaŭ, — diris Gimlio, — ke mia elekto restus sekreto, konota nur al mi.

— Al mi tio ŝajnis treege stranga, — diris Boromiro. — Eble tio estis nur provo, kaj ŝi volis pro propra bona celo legi niajn pensojn; sed mi preskaŭ supozis, ke ŝi tentas nin, kaj proponas tion, kion laŭpretende ŝi kapablas liveri. Ne necesas diri, ke aŭskulti mi rifuzis. La homoj el Minas Tirito fidelas al siaj promesoj. — Sed kion laŭ lia supozo la Damo proponis al li, tion Boromiro ne konigis.

Kaj se temis pri Frodo, li rifuzis paroli, malgraŭ ke Boromiro insistis per multaj demandoj.

— Ŝi longe vin rigardadis, Ringoportanto, — li diris.

— Jes, — diris Frodo, — sed kio ajn venis tiam en mian menson, tion mi retenos tie.

— Nu, estu singarda! — diris Boromiro. — Mi tute ne certas pri tiu elfa Damo kaj ŝiaj celoj.

— Ne parolu mise pri Damo Galadriela! — diris Aragorno severe. — Vi ne scias, kion vi diras. En ŝi kaj en tiu ĉi lando ne troviĝas miseco, krom se iu alportas ĝin mem. Tiuokaze li gardu sin! Sed hodiaŭ nokte mi dormos sentime la unuan fojon post kiam mi forlasis Rivendelon. Kaj mi dormu profunde kaj provizore forgesu mian malĝojon! Mi estas lacega korpe kaj kore. — Li faligis sin sur sian kanapon kaj tuj endormiĝis profunde.

La aliaj baldaŭ faris same, kaj nek bruo nek sonĝo perturbis ilian dormon. Vekiĝinte, ili konstatis, ke la taga lumo vastas sur la gazono antaŭ la pavilono, kaj la fontano supren-malsupreniras ekbrile pro la suno.

Ili restis kelkajn tagojn en Lotlorieno, laŭ malprecizaj konstatoj aŭ memoroj. La tutan tempon dum ili loĝis tie, la suno brilis klare, krom milda pluvo, kiu foje falis, kaj forpasis lasante ĉion freŝa kaj pura. La aero estis malvarmeta kaj milda, kvazaŭ temus pri fruprintempo, tamen ili sentis ĉirkaŭ si la profundan kaj penseman kvieton de vintro. Ŝajnis al ili, ke ili faras malmulton krom trinki, manĝi, ripozi kaj promeni inter la arboj; kaj tio sufiĉis.

Ili ne vidis denove la Sinjoron kaj Damon, kaj ili malmulte interparolis kun la elfoj, ĉar malmultaj el tiuj parolis lingvon alian ol sian propran arbaran. Haldiro adiaŭis kaj revenis al la limoj de l' nordo, kie severa vaĉado estis starigita post la informoj alportitaj de la Kunularo pri Morio.

Legolaso multe forestis inter la Galadrimoj, kaj post la unua nokto li ne dormis kun la ceteraj kunuloj, kvankam li revenis por manĝi kaj paroli kun ili. Ofte li kunprenis Gimlion, kiam li vagis en la lando, kaj la aliaj miris pri tiu ŝanĝiĝo.

Nun kiam la kunuloj sidis aŭ promenis kune, ili parolis pri Gandalfo, kaj ĉio, kion ili unuope sciis kaj vidis pri li, klariĝis antaŭ iliaj mensoj. Dum iliaj doloroj kaj laco kuraciĝis, la funebro pro ilia perdo pliakriĝis. Ofte ili aŭdis apude elfajn kantantajn voĉojn, kaj sciis, ke tiuj kreas lamentajn kantojn pri lia pereo, ĉar ili aŭdis lian nomon inter la dolĉaj malgajaj vortoj, kiujn ili ne povis kompreni.

Mitrandiro, Mitrandiro, — kantis la elfoj, — *Ho Pilgrimanto Griza*! Ĉar tiel ili ŝatis nomi lin. Sed se Legolaso estis kun la Kunularo, li ne volis interpreti por ili la kantojn, dirante, ke mankas al li la lerto, kaj ke por li la malĝojo estas ankoraŭ tro proksima, afero de larmoj kaj ankoraŭ ne por kantoj.

Frodo la unua envortigis heziteme iom el sia funebro. Li malofte stimuliĝis verki kanton aŭ rimaĵon; eĉ en Rivendelo li aŭskultis kaj mem ne kantis, kvankam lia memoro estis plenstokita je multaj, kiujn verkis antaŭe aliaj. Sed nun, dum li sidis apud la fontano de Lorieno kaj aŭdis ĉirkaŭ si la voĉojn de l' elfoj, lia pensado formiĝis laŭ kanto, kiu ŝajnis al li bela; tamen kiam li provis ripeti ĝin al Sam restis nur fragmentoj, velkintaj kiel manpleno da ŝrumpintaj folioj.

Kiam en la Provinc' vesperis,
aŭdiĝis lia paŝ' montete;
antaŭ tagiĝ' li malaperis
al vojaĝado tro diskrete.

De l' vast' ĝis okcidenta bordo,
de l' nordo ĝis monteto suda,
tra drakkavern' kaj kaŝa pordo
kaj Mornarbar' li iris truda.

Kun gnomo, elfo, hom', hobito,
negrave kion ili rolis,
surbranĉa bird' kaj best' sen brido —
laŭ ties lingvoj li parolis.

Mortiga glavo, man’ helpula,
dorso klinita sub ŝarĝpezo,
trumpeta voĉo, torĉo brula,
pilgrimo laca sur vojmezo.

Saĝulo estis li surtrona,
rapide rida aŭ kolera;
oldulo kun ĉapel’ ĉifona
apogis lin baston’ tubera.

Li sola sur la ponto pompis,
Fajron kaj Ombron kontraŭfortis;
bastonon lian ŝtono rompis,
en Ĥazad-dum’ la saĝo mortis.

— Vidu, vi baldaŭ superos eĉ s-ron Bilbo! — diris Sam.

— Ne, mi timas, ke ne, — diris Frodo. — Sed tio estas mia plejeblo.

— Nu, s-ro Frodo, se vi iam provos denove, espereble vi diros vorton pri liaj artfajraĵoj, — diris Sam. — Ekzemple:

Artaj raketoj la plej lertaj
fariĝis steloj bluaj, verdaj,
aŭ post la tondro, ora pluvo
faladis kiel flordiluvo.

Tamen tio ege nesufiĉe traktas ilin.

— Ne, tion mi lasos al vi, Sam. Aŭ eble al Bilbo. Sed — nu, mi ne povas plu priparoli tion. Al mi ne tolereblas pensi pri sciigo al li pri tio.

Iuvespere Frodo kaj Sam promenis kune en la malvarmeta krepusko. Ambaŭ denove sentis sin malpaciencaj. Sur Frodon subite falis la ombro de disiĝo: iel li sciis, ke tre proksimas la horo, kiam li devos lasi Lotlorienon.

— Kiel vi nun taksas la elfojn, Sam? — li diris. — Tiun demandon mi starigis al vi unu fojon antaŭe — tio jam ŝajnas antaŭ tre longe; sed vi pli multe konas ilin depost tiam.

— Estas vere! — diris Sam. — Kaj mi opinias, ke ekzistas elfoj kaj aliaj elfoj. Ili ĉiuj sufiĉe elfas, sed ili ne ĉiuj samas. Nu, ĉi tiu popolo ne estas vaga aŭ senhejma, kaj ŝajnas pli simila al niaj uloj: ili ŝajnas indiĝenaj ĉi tie, eĉ pli ol hobitoj en la Provinco. Ĉu ili formis la landon, aŭ la lando formis ilin, estas malfacile decidi, se vi min komprenas. Ĉi tie estas mirinde trankvile. Nenio ŝajnas okazi, kaj neniu ŝajnas deziri okazaĵojn. Se troviĝas magio, ĝi estas tre profunde kaŝita, tie kie mi ne povas preni ĝin, por tiel diri.

— Oni povas vidi kaj senti ĝin ĉie, — diris Frodo.

— Nu, — diris Sam, — oni vidas neniun, kiu okupiĝas pri ĝi. Mankas artfajraĵoj, kiujn kompatinda Gandalfo kutimis vidigi. Mi miras, ke ni neniom vidas la Sinjoron kaj Damon dum ĉi tiuj tagoj. Mi imagas, ĉu ne, ke *ŝi* povus efektivigi kelkajn mirindaĵojn, se ŝi emus. Mi kore ŝatus vidi iom da elfa magio, s-ro Frodo!

— Mi ne, — diris Frodo. — Mi estas kontenta. Kaj mankas al mi ne la artfajraĵoj de Gandalfo, sed liaj hirtaj brovoj, lia rapida koleriĝo kaj lia voĉo.

— Vi pravas, — diris Sam. — Kaj ne supozu, ke mi plendas. Mi ofte volis vidi iom da magio tia, kia estas priskribita en la malnovaj rakontoj, sed mi neniam aŭdis pri lando pli bona ol tiu ĉi. Estas kvazaŭ hejmi kaj ferii samtempe, se vi min komprenas. Mi ne emas foriri. Malgraŭ tio, mi komencas senti, ke se pluiro necesas, pli bone ni finfaru tion. *Tasko neniam komencita laste plenumiĝas*, kutimis diri mia Avulo. Kaj ne ŝajnas al mi, ke tiu ĉi popolo povas multe nin helpi pli, kun aŭ sen magio. Ĝuste kiam ni forlasos tiun ĉi landon plej mankos al ni Gandalfo, laŭ mia opinio.

— Mi timas, ke tio absolute veras, Sam, — diris Frodo. — Tamen mi tre esperas, ke antaŭ ol ni foriros ni revidos la Damon de l' elfoj.

Ĝuste dum li parolis, ili vidis, kvazaŭ responde al iliaj vortoj, ke Damo Galadriela proksimiĝis. Alta, blanka kaj bela ŝi promenis sub la arboj. Ŝi diris neniun vorton, sed fingrovokis ilin.

Turniĝinte flanken, ŝi kondukis ilin al la sudaj deklivoj de l' monteto Karas Galadono, kaj preterpasinte altan verdan dornbarilon ili alvenis enfermitan ĝardenon. Tie kreskis neniuj arboj, kaj ĝi kuŝis sub la neŝirmita ĉielo. La vespera stelo estis leviĝinta kaj brilis blankfajre super la okcidenta arbaro. Malsupren laŭ longa ŝtuparo la Damo iris al profunda verda kavo, tra kiu fluis murmure la arĝenta rojo, kiu eliĝis el la fonto sur la monteto. Ĉe la subo, sur malalta soklo kun ĉizaĵoj kiel disbranĉa arbo, staris kuvo el arĝento, larĝa kaj malprofunda, apud kiu staris arĝenta kruĉo.

Per akvo el la rojo Galadriela ĝisrande plenigis la kuvon, kaj spiris sur ĝin, kaj kiam la akvo denove senmoviĝis, ŝi ekparolis:

— Jen estas la Spegulo de Galadriela, — ŝi diris. — Mi kondukis vin ĉi tien por ke vi enrigardu ĝin, se vi volas.

La aero estis tute senmova, kaj la akvo malhelis, kaj la elfa Damo apud ili estis alta kaj pala.

— Kion ni serĉu, kaj kion ni vidos? — demandis Frodo, imponite.

— Mi povas ordoni al la Spegulo riveli multajn aferojn, — ŝi respondis, — kaj al iuj mi povas montri tion, kion ili deziras vidi. Sed la Spegulo povas montri ankaŭ aferojn nepetitajn, kaj tiuj ofte estas pli strangaj kaj pli avantaĝaj, ol tio, kion ni volas vidi. Kion vi vidos, se vi lasos aglibera la

Spegulon, mi ne povas antaŭvidi. Ĉar ĝi montras kio estis, kaj kio estas, kaj kio poste okazos. Sed kiun el ili li vidas, eĉ la plej saĝa ne ĉiam povas scii. Ĉu vi volas enrigardi?

Frodo ne respondis.

— Kaj vi? — ŝi diris, turnante sin al Sam. — Ĉar tio estas, kion via popolo nomas magio, mi opinias; kvankam mi ne klare komprenas, kion ili celas; kaj ŝajnas, ke ili ankaŭ uzas la saman vorton por la trompaĵoj de l' Malamiko. Sed tio ĉi, se vi volas, estas la magio de Galadriela. Ĉu vi ne diris, ke vi emas vidi elfan magion?

— Tion mi diris, — diris Sam, iomete tremante inter timo kaj scivolo. — Mi ekrigardos, Damo, se vi konsentas. Kaj min ne ĝenus ekvidi, kio okazas hejme, — li diris flanken al Frodo. — Ŝajnas, ke mi forestis terure longe. Sed negrave, probable mi vidos nur la stelojn, aŭ ion, kion mi ne komprenos.

— Probable, — diris la Damo kun milda rido. — Sed venu, rigardu kaj vidu, kion vi vidos. Ne tuŝu la akvon!

Sam surgrimpis la soklon kaj kliniĝis al la kuvo. La akvo aspektis malmola kaj malhela. Steloj respeguliĝis en ĝi.

— Estas nur steloj, kiel mi supozis, — li diris. Poste li eligis mallaŭtan spirospasmon, ĉar la steloj estingiĝis. Kvazaŭ malhela vualo estus fortirita, la Spegulo griziĝis, poste klariĝis. Brilis suno, kaj la arbobranĉoj flirtis kaj gestis pro vento. Sed antaŭ ol Sam povis decidi, kion li fakte vidas, la lumo forvelkis; kaj nun li pensis vidi Frodon palvizaĝan profunde dormanta sub malhela klifego. Poste li ŝajnis vidi sin iranta tra malluma koridoro kaj grimpanta senfinan serpentumantan ŝtuparon. Li subite konstatis, ke li urĝe serĉas ion, sed kion, li tute ne sciis. Kvazaŭ sonĝo la vizio ŝanĝiĝis kaj returniĝis, kaj li vidis denove la arbojn. Sed ĉi-foje ili ne estis tiom proksimaj, kaj li povis vidi, kio okazas: ili ne estis flirtantaj pro vento, ili falis, krake al tero.

— He! — kriis Sam per atenca voĉo. — Jen tiu Ted Sablomano faligas arbojn, kie li ne devus. Ili estas nefaligendaj: temas pri tiu avenuo post la Muelejo, kiu superombras la vojon al Apudakvo. Se nur mi povus atingi ĝis Ted, mi *lin* faligus.

Sed nun Sam konstatis, ke la Malnova Muelejo malaperis, kaj oni konstruis grandan konstruaĵon ruĝbrikan, kie ĝi antaŭe staris. Multaj personoj vigle laboris. Apude troviĝis alta ruĝa fumturo. Nigra fumo ŝajnis nebuligi la supraĵon de l' Spegulo.

— Okazas ia diablaĵo en la Provinco, — li diris. — Elrondo agis sagace, kiam li volis resendi s-ron Gaja. — Tiam subite Sam ekkriis kaj forsaltis. — Mi ne povas resti ĉi tie, — li diris frenezece. — Mi devas hejmeniri. Oni

elfosis Bagŝutan Vicon, kaj jen mia povra Avulo malsupreniras de la Monteto kun siaj etaj posedaĵoj sur ĉareto. Mi devas iri hejmen!

— Vi ne povas iri hejmen sola, — diris la Damo. — Vi ne volis iri hejmen sen via mastro, antaŭ ol vi enrigardis la Spegulon, kaj tamen vi sciis, ke misaferoj tre povus okazi en la Provinco. Memoru, ke la Spegulo montras multajn aferojn, kaj ne ĉiuj jam okazis. Kelkaj neniam okazas, krom se tiuj, kiuj vidas la viziojn, forturniĝas de sia vojo por malhelpi ilin. La Spegulo estas danĝera gvidanto al agado.

Sam sidiĝis sur la teron kaj metis sian kapon inter la manojn.

— Prefere mi neniam estu veninta ĉi tien, kaj neniom pli da magio mi volas vidi, — li diris kaj silentiĝis. Post momento li parolis denove, malklare, kvazaŭ li kontraŭluktus larmojn. — Ne, mi hejmeniros laŭ la vojo longa kun s-ro Frodo, aŭ mi tute ne hejmeniros. Sed mi esperas, ke iam mi reiros. Se tio, kion mi vidis, pruviĝos vera, iu estos bone tradraŝita!

— Ĉu nun vi volas rigardi, Frodo? — diris Damo Galadriela. — Vi ne volis vidi elfan magion, kaj estis kontenta.

— Ĉu vi konsilas, ke mi rigardu? — demandis Frodo.

— Ne, — ŝi diris. — Mi konsilas al vi nek jeson, nek neon. Mi ne estas konsilisto. Vi eble ekscios ion, kaj ĉu aŭ ne tio, kion vi vidos, estos bona aŭ misa, tio eble estos avantaĝa, kaj tamen eble ne estos. Vidi estas samtempe bone kaj danĝere. Tamen mi opinias, Frodo, ke viaj kuraĝo kaj saĝo sufiĉas al la provo, aŭ mi ne estus kondukinta vin ĉi tien. Faru laŭplaĉe!

— Mi rigardos, — diris Frodo, kaj li surgrimpis la soklon kaj kliniĝis al la malhela akvo. Tuj la Spegulo klariĝis kaj li vidis terenon krepuskan. Montoj baŭmis malhele en la malproksimo kontraŭ pala ĉielo. Longa griza vojo reserpentumis for de la vido. Fore figuro iris malrapide sur la vojo, unue malklara kaj eta, sed pli grandiĝanta kaj klariĝanta dum ĝi proksimiĝis. Subite Frodo konstatis, ke tiu memorigas al li Gandalfon. Li preskaŭ vokis voĉe la nomon de l' sorĉisto, kaj tiam li rimarkis, ke la figuron vestis ne grizo, sed blanko, blanko kiu briletis malforte en la krepusko, kaj en ĝia mano estis blanka bastono. La kapo estis tiom klinita, ke li povis vidi neniun vizaĝon, kaj baldaŭ la figuro foriris post vojkurbon kaj eliris el la vidkampo de l' Spegulo. Dubo venis la menson de Frodo: ĉu tio estis vizio pri Gandalfo dum unu el ties multaj solecaj vojaĝoj antaŭ longe, aŭ ĉu ĝi estis Sarumano?

La vizio ŝanĝiĝis. Mallonge kaj ete, sed tre kolorplene, li ekvidis Bilbon senripoze ĉirkaŭiranta en ties ĉambro. La tablon kovris malorde diversaj paperoj; pluvo albatis la fenestrojn.

Sekvis paŭzo, kaj sekvis poste multaj scenoj, kiuj estis, laŭ supozo de Frodo, partoj de granda historio, en kiu li mem estis implikita. La nebulo

klariĝis kaj li vidis ion, kion li neniam antaŭe vidis, sed tuj rekonis: la maron. Noktiĝis. La maro agitiĝis kaj ekestis ŝtorma. Tiam li vidis kontraŭ la suno, subiranta sangoruĝa en fukecan nubaron, la nigran konturaron de alta ŝipo kun ŝiritaj veloj, alrajdanta el la Okcidento. Poste larĝan riveron fluantan tra multhoma urbego. Poste blankan fortikaĵon kun sep turoj. Kaj poste denove ŝipon kun nigraj veloj, sed nun jam estis matene, kaj la akvo muaris en lumo, kaj standardo portanta emblemon de blanka arbo brilis en la sunlumo. Fumo kvazaŭ de fajro kaj batalo leviĝis, kaj denove la suno subiris je brula ruĝo, kiu velkis al griza nebuleto; kaj en ties mezon ŝipeto forpasis, sparkante je lumoj. Ĝi malaperis, kaj Frodo ĝemspiris kaj pretiĝis retroiri.

Sed subite la Spegulo komplete malheliĝis, tiom malhela kvazaŭ truo malfermiĝus en la vidmondo, kaj Frodo enrigardis malplenecon. En tiu nigra abismo aperis unuopa Okulo, kiu malrapide pligrandiĝis, ĝis ĝi plenigis preskaŭ la tutan Spegulon. Tiom terura ĝi estis, ke Frodo staris ĉenite, ne povante krii aŭ forturni la rigardon. La Okulon randis fajro, sed ĝi mem estis glaca, flava kiel okulo de kato, spionema kaj absorbita, kaj la nigra fendeto de ĝia pupilo malfermiĝis al puto, fenestro al nenio.

Poste la Okulo komencis ĉirkaŭiri, esplorante jen tien jen aliflanken, kaj Frodo sciis certe kaj terurite, ke inter la multaj aĵoj, kiujn ĝi serĉis, li mem estis unu. Sed li sciis ankaŭ, ke lin ĝi ne povas vidi — ankoraŭ ne, krom se li tion kaŭzus. La Ringo, kiu pendis sur ĉeneto je lia kolo, iĝis peza, pli peza ol ŝtonego, kaj lia kapo estis trenata suben. La Spegulo ŝajnis varmegiĝi kaj vaporkirlaĵoj supreniris de l' akvo. Li estis glisanta antaŭen.

— Ne tuŝu la akvon! — mallaŭte diris la Damo. La vizio forvelkis, kaj Frodo konstatis, ke li rigardas la malvarmetajn stelojn ekbrilintaj en la arĝenta kuvo. Li retropaŝis tute tremante kaj rigardis la Damon.

— Mi scias, kio estas tio, kion vi laste vidis, — ŝi diris, — ĉar tio estas ankaŭ en mia menso. Ne timu! Ne supozu, ke nur per kantado inter arboj, aŭ eĉ per la sveltaj sagoj de elfaj pafarkoj, tiu ĉi lando Lotlorieno estas defendata kontraŭ la Malamiko. Mi diras al vi, Frodo, ke ĝuste dum mi alparolas vin, mi perceptas la Malhelan Mastron kaj konas lian menson, aŭ tiun parton, kiu koncernas la elfojn. Kaj li palpserĉas ĉiam por percepti min kaj mian pensadon. Sed ankoraŭ la pordo estas fermita!

Ŝi levis siajn blankajn brakojn, kaj etendis siajn manojn al la oriento laŭ gesto de forpuŝo kaj rifuzo. Erendilo, la vespera stelo, plej amata de l' elfoj, klare brilis supre. Tiom hela ĝi estis, ke la figuro de la elfa Damo kreis malfortan ombron sur la tero. Ĝiaj radioj trafis ringon sur ŝia fingro, kaj blanka gemo sur ĝi sparkis kvazaŭ la Vespera Stelo venus suben por ripozi sur ŝia mano. Frodo rigardis imponite tiun ringon; ĉar subite al li ŝajnis, ke

li komprenas.

— Jes, — ŝi diris, perceptinte lian penson, — ne estas permesate paroli pri ĝi, kaj Elrondo ne povis tion fari. Sed ĝi ne estas forkaŝebla de la Ringoportanto, kaj iu, kiu vidis la Okulon. Estas vere, ke unu el la Tri restas sur fingro de Galadriela en Lorieno. Tiu ĉi estas Nenja, la Ringo de l' Diamanto, kaj mi estas ĝia kuratoro.

» Li suspektas, sed li ne scias — ankoraŭ ne. Ĉu vi ne komprenas nun, kial via alveno estas por ni kvazaŭ paŝo al pereo? ĉar se vi malsukcesos, tiam ni estos nudigitaj antaŭ la Malamiko. Tamen se vi sukcesos, tiam nia potenco estos malplia, kaj Lotlorieno forvelkos, kaj la tajdoj de l' Tempo forviŝos ĝin. Ni devos foriri al la Okcidento, aŭ ŝrumpi al kamparana popolo de valetoj kaj kavernoj, malrapide forgesonta kaj forgesota.

Frodo klinis la kapon.

— Kaj kion vi deziras? — li diris finfine.

— Ke estu tio, kio devus esti, — ŝi respondis. — La amo de la elfoj al sia lando kaj siaj verkoj estas pli profunda ol la profundaĵoj de l' Maro, kaj ilia bedaŭro estas senmorta kaj neniam povas esti tute kvietigita. Tamen ili forĵetos ĉion prefere ol submetiĝi al Saŭrono: ĉar ili nun konas lin. Pri la sorto de Lotlorieno vi ne respondecas, sed nur pri la plenumo de via propra tasko. Tamen mi povus deziri, se tio iel helpus, ke la Unu Ringo neniam estus kreita, aŭ restus eterne perdita.

— Vi estas saĝa, sentima kaj bela, Damo Galadriela, — diris Frodo. — Mi donos al vi la Unu Ringon, se vi ĝin petos. Ĝi estas afero tro granda por mi.

Galadriela ridis per subita klara rido.

— Povas esti, ke Damo Galadriela estas saĝa, — ŝi diris, — tamen ĉi tie ŝi renkontis superulon pri ĝentileco. Milde vi venĝis vin pro mia provado de via koro je nia unua renkontiĝo. Vi komencas vidi per akra okulo. Mi ne neas, ke mia koro ege deziras peti tion, kion vi proponas. Dum multaj longaj jaroj mi pripensis, kion mi povus fari, se la Granda Ringo iam venus en miajn manojn, kaj jen! ĝi estis alportita ĝis mia mankapto. La miseco, kiu estis antaŭ longe elpensita, efikas multmaniere, ĉu aŭ ne Saŭrono mem staras aŭ pereas. Ĉu tio ne estus brava faro je kredito de lia Ringo, se mi prenus ĝin perforte aŭ timige de mia gasto? Kaj nun finfine tio venas. Vi donos al mi la Ringon libere! Anstataŭ la Malhela Mastro vi starigos Reĝinon. Kaj mi ne estos malhela, sed bela kaj terura kiel la mateno kaj la nokto! Bela kiel la maro, suno kaj neĝo sur la monto! Terura kiel la ŝtormo kaj la fulmo! Pli forta ol la fundamento de la tero. Ĉiuj min amos kaj timos senespere!

Ŝi levis sian manon kaj el la ringo, kiun ŝi portis, eliĝis lumego, kiu

lumigis nur ŝin kaj lasis ĉion alian malluma. Ŝi staris antaŭ Frodo ŝajnante jam alta preter mezurebleco, kaj bela netolereble, terura kaj adorinda. Poste ŝi lasis fali sian manon, kaj la lumo velkis, kaj subite ŝi denove ridis, kaj jen! ŝi ŝrumpis: svelta elfino, vestita nur per simpla blanko, kies voĉo estis mallaŭta kaj trista.

— Mi sukcesis la provon, — ŝi diris. — Mi iĝos malplia, kaj iros al Okcidento kaj restos Galadriela.

Longe ili staris silente. Fine la Damo parolis denove.

— Ni reiru! — ŝi diris. — En la mateno vi devos foriri, ĉar jam ni elektis, kaj la sortotajdoj fluas.

— Mi volas starigi unu demandon antaŭ nia foriro, — diris Frodo, — ion, pri kio mi intencis demandi Gandalfon en Rivendelo. Al mi estas permesate porti la Unu Ringon: kial mi ne povas vidi ĉiujn aliajn kaj koni la pensojn de ties portantoj?

— Vi ne provis, — ŝi diris. — Nur trifoje vi surmetis la Ringon sur vian fingron de kiam vi scias, kion vi posedas. Ne provu! Tio pereigus vin. Ĉu Gandalfo ne diris al vi, ke la ringoj havigas potencon laŭ la mezuro de ĉiu posedanto? Antaŭ ol uzi tiun potencon, vi devus multe plifortiĝi, kaj eduki vian volon por superregi aliulojn. Tamen malgraŭ tio, kiel Ringoportanto kaj iu, kiu jam portis ĝin fingre kaj vidis tion, kio estas kaŝita, via vidkapablo pliakriĝis. Vi perceptis mian penson pli klare ol multaj, kiujn oni taksas saĝaj. Vi vidis la Okulon de tiu, kiu regas la Sepon kaj la Naŭon. Kaj ĉu vi ne vidis kaj rekonis la ringon sur mia fingro? Ĉu vi vidis mian ringon? — ŝi demandis, turninte sin al Sam.

— Ne, Damo, — li respondis. — Se diri la veron, mi scivolis, pri kio vi parolas. Mi vidis stelon tra viaj fingroj. Sed se vi pardonos mian rektan parolon, mi opinias, ke mia mastro pravis. Mi volus, ke vi prenu lian Ringon. Vi ordigus la aferojn. Vi malhelpus, ke oni elfosu la Avulon kaj forpelu lin. Vi pagigus kelkajn personojn pro ties fiagado.

— Tion mi farus, — ŝi diris. — Tiel ĝi komenciĝus. Sed tie ĝi ne haltus, ho ve! Ni ne priparolu ĝin plu. Ni iru!

8

Adiaŭ al Lorieno

Tiun nokton la Kunularo estis denove alvokita al la ĉambro de Celeborno, kaj tie la Sinjoro kaj Damo salutis ilin per afablaj vortoj. Finfine Celeborno parolis pri ilia foriro.

— Nun venis la horo, kiam tiuj, kiuj volas daŭrigi la Celon, devas fortigi siajn korojn por forlasi tiun ĉi landon. Tiuj, kiuj ne plu deziras iri antaŭen, rajtas resti ĉi tie, dum iom da tempo. Sed ĉu oni iros aŭ ne, oni ne povas certi pri paco. Ĉar ni jam alvenis pereorandon. Ĉi tie tiuj, kiuj volas, rajtas atendi la proksimiĝon de l' horo, kiam aŭ la mondaj vojoj estos denove liberaj, aŭ ni vokos ilin al la lasta bezono de Lorieno. Tiam ili rajtos reiri al siaj landoj, aŭ iri al la daŭra hejmo de tiuj, kiuj pereis batalante.

Sekvis silento.

— Ĉiuj decidis iri antaŭen, — diris Galadriela, rigardante en ĉies okulojn.

— Kiom koncernas min, — diris Boromiro, — mia vojo hejmen kondukas antaŭen kaj ne retroen.

— Tio estas vera, — diris Celeborno, — sed ĉu tiu ĉi tuta Kunularo iros kun vi ĝis Minaso Tirit?

— Ni ankoraŭ ne decidis pri nia vojo, — diris Aragorno. — Post Lorieno mi ne scias, kion intencis fari Gandalfo. Efektive, al mi ŝajnas, ke eĉ li ne havis klaran celon.

— Eble ne, — diris Celeborno. — Tamen kiam vi forlasos tiun ĉi landon, vi ne plu povos forgesi la Grandan Riveron. Kiel iuj el vi bone scias, ĝi ne estas transirebla far vojaĝantoj kun pakaĵoj inter Lorieno kaj Gondoro, krom boate. Ĉu la pontoj de Osgiliado ne estas rompitaj kaj ĉiuj albordiĝejoj nun okupataj de l' Malamiko? Laŭ kiu bordo vi vojaĝos? La vojo al Minaso Tirit troviĝas ĉi-borde, ĉe la okcidento; sed la rekta vojo al la celo troviĝas oriente de l' Rivero, sur la bordo pli malhela. Kiun bordon vi nun laŭiros?

— Se mian konsilon oni atentos, temos pri la okcidenta bordo, kaj la vojo al Minaso Tirit, — respondis Boromiro. — Sed mi ne estas la ĉefa en la Kunularo. — La aliaj diris nenion, kaj Boromiro aspektis dubema kaj ĝenata.

— Mi konstatas, ke vi ankoraŭ ne scias kion fari, — diris Celeborno.

— Ne estas mia rolo elekti por vi, sed mi helpos vin laŭeble. Inter vi estas kelkaj, kiuj scias navigi boatojn: Legolaso, kies popolo konas la rapidan Arbaran Riveron, Boromiro de Gondoro kaj Aragorno la vojaĝisto.

— Kaj unu hobito! — kriis Gaja. — Ne ĉiuj el ni taksas boatojn kvazaŭ sovaĝajn ĉevalojn. Mia popolo loĝas sur la bordoj de Brandovino.

— Tio estas bona, — diris Celeborno. — Do mi havigos al via Kunularo boatojn. Ili estos malgrandaj kaj leĝeraj, ĉar se vi iros longe sur akvo, troviĝos lokoj, kie vi estos devigataj porti ilin. Vi alvenos la rapidejojn de Sarn Gebiro, kaj eble finfine ĝis la grandaj akvofaloj de Raŭroso, kie la Rivero tondras suben de Nen Hithoelo; kaj estas aliaj danĝeroj. Boatoj eble faciligos dum iom da tempo vian vojaĝon. Tamen ili ne havigos al vi konsilojn: en la fino vi devos lasi ilin kaj la Riveron, kaj turniĝu okcidenten — aŭ orienten.

Aragorno dankis Celebornon multfoje. La donaco de boatoj multe faciligis lian menson, ne malĉefe ĉar jam ne estos neceso decidi pri la vojo dum kelkaj tagoj. La aliaj ankaŭ aspektis pli esperplenaj. Kiaj ajn estis la danĝeroj antaŭ ili, ŝajnis preferinde flosi renkonte al ili laŭ la larĝa fluo de Anduino ol pezpaŝi antaŭen kun kurbigitaj dorsoj. Nur Sam estis dubema: almenaŭ li daŭre taksis boatojn tiel nedezirindaj kiel sovaĝaj ĉevaloj, aŭ eĉ pli, kaj ne ĉiuj danĝeroj, kiujn li travivis, persvadis lin pli alte taksi ilin.

— Ĉio estos preparita por vi kaj atendos vin ĉe la haveno antaŭ la morgaŭa tagmezo, — diris Celeborno. — Mi sendos miajn servantojn al vi en la mateno por helpi vin prepari la vojaĝon. Nun ni deziras al vi agrablan nokton kaj senĝenan dormon.

— Bonan nokton, amikoj miaj! — diris Galadriela. — Dormu trankvile! Ne tro ĝenu viajn korojn hodiaŭ nokte per pensoj pri la vojo. Eble la padoj, kiujn vi unuope paŝos estas jam metitaj antaŭ viaj piedoj, kvankam vi ne vidas ilin. Bonan nokton!

La Kunularo nun adiaŭis kaj reiris al sia pavilono. Legolaso akompanis ilin, ĉar tio estos ilia lasta nokto en Lotlorieno, kaj malgraŭ la vortoj de Galadriela ili volis interkonsiliĝi.

Ili longe debatis, kion ili devus fari por plej bone provi plenumon de sia celo kun la Ringo; sed ili nenion decidis. Estis klare, ke la plimulto el ili volis iri unue al Minaso Tirit, kaj eskapi almenaŭ provizore de l' timego pri la Malamiko. Ili volonte sekvus sian ĉefon trans la Riveron kaj en la ombron de Mordoro, sed Frodo diris neniun vorton, kaj Aragorno ankoraŭ havis menson dividitan.

Lia propra plano, dum Gandalfo restis kun ili, estis iri kun Boromiro kaj per sia glavo helpi pri liberigo de Gondoro. Ĉar li kredis, ke la mesaĝo de la sonĝoj estis alvoko, kaj ke la horo fine jam alvenis, kiam la heredinto de

Elendilo aperu kaj luktu kontraŭ Saŭronon por la estreco. Sed en Morio la ŝarĝo de Gandalfo estis metita sur lin, kaj li sciis, ke li jam ne povas forlasi la Ringon, se Frodo fine rifuzos akompani Boromiron. Kaj tamen kian helpon li aŭ iu el la Kunularo povus havigi al Frodo, krom marŝi blinde kun li en la mallumon?

— Mi iros al Minaso Tirit, sola se necese, ĉar tio estas mia devo, — diris Boromiro, kaj poste li silentis dum kelka tempo, sidante kun fiksa rigardo al Frodo, kvazaŭ li provus legi la pensojn de l' duonulo. Finfine li denove ekparolis, mallaŭte, kvazaŭ li debatus kun si. — Se vi volas nur detrui la Ringon, tiuokaze malmulte utilus milito aŭ armiloj, kaj la homoj el Minaso Tirit ne povos helpi. Sed se vi volas detrui la armitan potencon de l' Malluma Mastro, estas malsaĝe iri sen armeo en lian regnon; kaj malsaĝe forĵeti. — Li subite paŭzis, kvazaŭ li konstatus, ke li esprimas vorte siajn pensojn. — Estus malsaĝe forĵeti vivojn, mi intencis diri, — li finis. — Temas pri elekto inter defendo de fortikaĵo aŭ marŝado malkaŝe en la brakojn de la morto. Almenaŭ, tiel mi juĝas la situacion.

Frodo konstatis ion novan kaj strangan en la rigardo de Boromiro, kaj tiun li rigardis fikse. La penso de Boromiro klare malsamis ties finajn vortojn. Estus malsaĝe forĵeti: kion? La Ringon de Potenco? Ion similan li diris ĉe la Konsiliĝo, sed tiam li akceptis la korekton de Elrondo. Frodo rigardis al Aragorno, sed tiu aspektis profundiĝinta en propran pensadon kaj neniel indikis, ke li atentis la vortojn de Boromiro. Kaj tiel finiĝis la debato. Gaja kaj Grinĉjo jam dormis, kaj Sam estis ekdormonta. La nokto estis forpasanta.

Matene, dum ili komencis paki siajn magrajn posedaĵojn, elfoj scipovantaj ilian lingvon venis al ili kaj alportis multajn donacojn de manĝaĵo kaj vestaĵoj por la vojaĝo. La manĝaĵo plejparte konsistis el tre maldikaj kukoj, faritaj el faruno bakita iom brune ekstere, kaj interne estis kremkoloraj. Gimlio prenis unu el la kukoj kaj rigardis ĝin dubeme.

— *Kram*, — li diris subvoĉe, derompante krispan angulon kaj mordetante ĝin. Lia esprimo rapide aliiĝis, kaj li manĝis la tutan ceteron frandeme.

— Ne pli, ne pli! — kriis la elfoj ridante. — Vi jam manĝis sufiĉe por longa tagmarŝo.

— Mi supozis ĝin nur speco de *kramo*, tia, kian oni bakas en Dalo por vojaĝoj en la sovaĝejo, — diris la gnomo.

— Tia ĝi estas, — ili respondis. — Sed ni nomas ĝin *lembas* aŭ vojpano, kaj ĝi estas pli fortiga ol iu ajn manĝaĵo pretigata de l' homoj, kaj ĝi estas pli agrabla ol *kramo*, laŭ ĉiuj raportoj.

— Efektive ĝi estas, — diris Gimlio. — Fakte ĝi estas supera al la

mielkukoj de la Beornidoj, kaj tio estas forta laŭdo, ĉar la Beornidoj estas la plej lertaj bakistoj, pri kiuj mi scias; sed ili ne tre volonte disdonas siajn kukojn al vojaĝantoj en la nuna tempo. Vi estas bonkoraj gastigantoj!

— Tamen ni ordonas, ke vi ŝparu la manĝaĵon, — ili diris. — Manĝu ĉiufoje nur tiom, kaj nur kiam necese. Ĉar tiuj aferoj estas donitaj por utili al vi, kiam ĉio alia malestos. La kukoj restos dolĉaj dum multaj tagoj, se ili estos nerompitaj kaj restos en siaj folivolvaĵoj, kiel ni alportis ilin. Unu ebligos vojaĝanton paŝi dum tago da longa laborado, eĉ se li estas unu el la altuloj de Minaso Tirit.

La elfoj poste malpakis kaj donis al la Kunularo la alportitajn vestaĵojn. Al ĉiu ili havigis po kapuĉon kaj mantelon, fasonitajn laŭ ties mezuro, el la malpeza, sed varmiga silkeca ŝtofo, kiun Galadrimoj teksis. Estis malfacile decidi pri ilia koloro: griza kun nuanco de subarba krepusko ĝi ŝajnis; kaj tamen kiam ili moviĝis, aŭ eniris alian lumon, ili estis verdaj kiel ombrecaj folioj, aŭ brunaj kiel novalaj kampoj nokte, krepuskarĝentaj kiel akvo sub la steloj. Ĉiun mantelon ligis • ĉe la kolo broĉo kiel verda folio vejnita per arĝento.

— Ĉu tiuj manteloj estas magiaj? — demandis Grinĉjo, mire rigardante ilin.

— Mi ne scias, kion tio signifas, — respondis la estro de la elfoj. — Ili estas belaj vestaĵoj, kaj la teksaĵo estas bona, ĉar ĝi estis tajlita en tiu ĉi lando. Ili ja estas manteloj elfaj, se tion vi volas diri. Folio kaj branĉo, akvo kaj ŝtono: ili havas la nuancon kaj belon de ĉio en la krepusko de Lorieno, kion ni amas; ĉar ni inkluzivas penson pri ĉio amata en ĉio, kion ni kreas. Tamen ili estas vestaĵoj, ne armaĵoj, kaj ili ne forturnos lancon aŭ klingon. Sed ili verŝajne servos vin bone: ili estas malpezaj, kaj sufiĉe varmigaj aŭ friskigaj laŭbezone. Kaj vi trovos ilin granda helpo por nevidatiĝi je neamikaj okuloj, ĉu vi marŝos inter ŝtonoj, ĉu inter arboj. Vi ja estas ege favorataj de la Damo! Ĉar ŝi mem kaj ŝiaj junulinoj teksis tiun ŝtofon; kaj neniam antaŭe ni vestis fremdulojn per la vestaĵoj de nia propra popolo.

Post la matenmanĝo la Kunularo adiaŭis la gazonon apud la fontano. Iliaj koroj estis pezaj, ĉar ĝi estis loko bela, kaj fariĝis hejmsimila por ili, kvankam ili ne povis kalkuli kiom da tagoj kaj noktoj ili pasigis tie. Dum ili staris momente rigardante la blankan akvon en la sunlumo, Haldiro venis al ili marŝante trans la verdan herbon de la maldensejo. Frodo salutis lin ĝoje.

— Mi revenis de la nordaj limoj, — diris la elfo, — kaj mi estas nun sendita por esti via gvidanto. La Dimrila Valo estas plena je vaporo kaj fumnuboj, kaj la montoj estas perturbataj. Aŭdiĝas bruoj profunde en la tero. Se iu el vi estus proponinta reiri norden al viaj hejmoj, ne estus eble por vi pasi tiuvoje. Sed ek! Via vojo nun direktiĝos suden.

Kiam ili trairis Karas Galadonon, la verdaj vojoj estis senpersonaj, sed sur la arboj supre multaj voĉoj murmuris kaj kantadis. Ili mem iris silente. Fine Haldiro kondukis ilin malsupren laŭ la sudaj deklivoj de l' monteto, kaj ili alvenis denove la grandan pordegon lampornamitan, kaj la blankan ponton; kaj tiel ili eliris kaj forlasis la urbon de l' elfoj. Poste ili forturniĝis de l' pavimita vojo kaj laŭiris vojeton, kiu malaperis en densejon da *malornoj*, kaj pluiris, serpentume trans ondiĝajn arbarejojn el arĝenta ombreco, gvidante ilin ĉiam suben, suden kaj orienten, al la bordoj de la Rivero.

Ili marŝis proksimume dek mejlojn kaj preskaŭ tagmezis, kiam ili venis al alta verda muro. Trapasinte breĉon, ili subite forlasis la arbojn. Antaŭ ili etendiĝis longa gazono brilherba, punktita je oraj *elanoroj*, kiuj ekbrilis en la sunlumo. La gazono iĝis mallarĝa strio inter du helaj randoj: dekstre kaj okcidente Arĝentvejno fluadis flagretante; maldekstre kaj oriente la Granda Rivero ruligis siajn larĝajn akvojn, profundajn kaj malhelajn. Sur la kontraŭaj bordoj la arbaroj daŭre progresis suden ĝis limo de l' vidkapablo, sed ĉiuj akvorandoj estis dezertaj kaj nudaj. Neniu *malorno* levis siajn orŝarĝitajn branĉojn ekster la lando Lorieno.

Sur la bordo de Arĝentvejno, iom fore de l' renkontiĝejo de la riveroj, estis kajo el blankaj ŝtonoj kaj blanka ligno. Apude estis ligitaj multaj boatoj kaj barĝoj. Iuj estis hele farbitaj kaj brilis je arĝento kaj oro kaj verdo, sed la plimultaj estis blankaj aŭ grizaj. Tri malgrandaj grizaj boatoj estis pretigitaj por la vojaĝontoj, kaj en tiuj la elfoj stivis iliajn posedaĵojn. Kaj ili aldonis ankaŭ volvaĵojn da ŝnuro, po tri en ĉiu boato. Maldikaj tiuj aspektis, sed fortaj, silkecaj laŭtuŝe, grizaj kiel la elfaj manteloj.

— Kio estas tiuj? — demandis Sam, palpante unu, kiu kuŝis sur la verda herbo.

— Ŝnuroj kompreneble! — respondis elfo el la boatoj. — Neniam vojaĝu eĉ mallonge sen ŝnuro! Kaj ŝnuro longa kaj forta kaj malpeza. Tiaj estas ĉi tiuj. Ili eble helpos pri multaj bezonoj.

— Ne necesas diri tion al mi! — diris Sam. — Mi venis senŝnure, kaj ĉiam tio min ĝenis. Sed mi scivolas, el kio ĉi tiuj estas faritaj, ĉar mi scias iom pri ŝnurfarado: ĝi estas familia metio, por tiel diri.

— Ili estas faritaj el *hitlajno*, — diris la elfo, — sed mankas nun tempo por instrui al vi ilian faradon. Se ni scius pli frue, ke tiu metio ĝojigas vin, ni povus instrui al vi multon. Sed nun, ho ve! krom se vi revenos alian fojon ĉi tien, vi devas kontentiĝi per nia donaco. Ke ĝi servu vin fidele!

— Ek! — diris Haldiro. — ĉio jam pretas por vi. Eniru la boatojn! Sed estu singardaj komence!

— Atentu la vortojn! — diris la aliaj elfoj. — Tiuj boatoj estas malpeze

konstruitaj, kaj ili estas ruzaj kaj ne similas la boatojn de aliaj popoloj. Ili ne subakviĝos, kiom ajn vi ŝarĝos ilin; sed ili estas kapricaj se misnavigataj. Estus saĝe, se vi ekzercus eniron kaj eliron ĉi tie, kie estas kajo, antaŭ ol eknavigi laŭ la fluo.

La Kunularo estis aranĝita tiamaniere: Aragorno, Frodo kaj Sam okupis unu boaton; Boromiro, Gaja kaj Grinĉjo alian; kaj en la tria estis Legolaso kaj Gimlio, kiuj jam firme amikiĝis. En tiu lasta boato estis stivita la plejparto de l' posedaĵoj kaj pakaĵoj. La boatojn movis kaj stiris kurttenilaj remiloj, kiuj havis foliformajn plataĵojn. Kiam ĉio estis preta, Aragorno gvidis ilin laŭ provnavigo kontraŭfluen sur la Arĝentvejno. La fluo estis rapida, kaj ili iris antaŭen malrapide. Sam sidis ĉe la pruo, kroĉante la flankojn kaj rerigardante sopire al la bordo. La sunlumo brilis sur la akvo kaj nebuligis liajn okulojn. Kiam ili pasis preter la verdan gazonon de l' terstrio, la arboj kreskis ĝis la rando de l' rivero. Ie-tie oraj folioj saltetis kaj flosis sur la ondetiĝa fluo. La aero estis tre hela kaj senmova, kaj ĉio silentis, krom alta malproksima kantado de alaŭdoj.

Ili ĉirkaŭiris abruptan kurbiĝon de la rivero, kaj jen, naĝante fiere laŭ la fluo al ili, vidiĝis enorma cignego. La akvo rugis ambaŭflanke de la blanka brusto sub ĝia kurba kolo. Ĝia beko brilis simile al polurita oro, kaj ĝiaj okuloj glimis kvazaŭ gagato muntita en flavaj gemoj; ĝiaj blankaj flugilegoj estis duonlevitaj. Muziko alvenis laŭ la rivero dum ĝi proksimiĝis; kaj subite ili perceptis, ke tio estas ŝipo, verkita kaj ĉizita per elfa lerteco je similaĵo de birdo. Du elfoj blankvestitaj navigis ĝin per nigraj remiloj. Meze de la ŝipo sidis Celeborno, kaj malantaŭ li staris Galadriela, alta kaj blanka. Cirkleto de oraj floroj ornamis ŝiajn harojn, kaj en la mano ŝi tenis harpon, kaj ŝi kantis. Malĝoje kaj dolĉe sonis ŝia voĉo en la malvarmeta klara aero:

Mi kantis pri folioj oraj, orfolioj kreskis:
pri vent' mi kantis, kaj tra l' branĉoj blova vent' ekestis.
Preter la Suno kaj la Luno, jen la Maro ŝaŭmis,
apud la strando Ilmarina Arbo ora baŭmis.
En Eldamaro brilis ĝi sub la Vesper-stelaro,
apud murar' de Tirion' en elfa Eldamaro.
La orfolioj longe kreskis sur la jaroj branĉaj,
dum elfaj larmoj falas preter Maroj nun Distranĉaj.
Ho, Lorieno! Venas Vintro, Tago senfolias;
folioj falas al la fluo, la River' devias.
Ho, Lorien'! Tro longe loĝis mi ĉi strandon foran
kaj en velkanta krono plektis elanoron oran.
Sed se mi kantus nun pri ŝipoj, kiu ŝipo venus,
kaj trans la maron tiel larĝan iam min kunprenus?

Aragorno haltigis sian boaton kiam la cignoŝipo apudiĝis. La Damo finis sian kanton kaj salutis ilin.

— Ni venis por lastfoje adiaŭi vin, — ŝi diris, — kaj forsendi vin kun benoj el nia lando.

— Kvankam vi estis niaj gastoj, — diris Celeborno, — vi ankoraŭ ne manĝis kun ni, kaj sekve ni invitas vin al disiĝa festo, ĉi tie inter la fluantaj akvoj, kiuj portos vin malproksimen de Lorieno.

La cigno iris malrapide ĝis la kajo, kaj ili turnis siajn boatojn kaj sekvis ĝin. Tie ĉe la fino de Egladilo sur la verda herbo okazis la disiĝa festo; sed Frodo manĝis kaj trinkis malmulte, atentante nur la belon de la Damo kaj ties voĉo. Ŝi ne plu ŝajnis danĝera aŭ timiga, nek plenigita de kaŝita potenco. Jam ŝi ŝajnis al li, kiel homoj el postaj tagoj ankoraŭ kelkfoje vidas elfojn: ĉeesta kaj tamen malproksima, viva vizio de tio, kio jam postlasiĝis tre fore de l' fluantaj fluoj de l' tempo.

Kiam ili finmanĝis kaj fintrinkis, sidante sur la herbo, Celeborno denove parolis al ili pri ilia vojaĝo, kaj levinte sian manon li indikis suden al la arbaroj post la terstrio.

— Kiam vi navigos laŭflue, — li diris, — vi trovos, ke la arboj ĉesos, kaj vi alvenos terenon dezertan. Tie la Rivero fluas en ŝtonozaj valoj inter altaj erikejoj, ĝis fine post multegaj mejloj ĝi alvenas la altan insulon Tindroko, kiun ni nomas Tol Brandiro. Tie ĝi dismetas siajn brakojn ĉirkaŭ la apikaj bordoj de l' insulo, kaj poste falas bruege kaj vaporege laŭ la kaskadegoj de Raŭroso suben en Nindalfon, la Malsekvangon kiel oni nomas ĝin en via lingvo. Tio estas larĝa regiono de limakeca marĉo, kie la fluo iĝas serpentuma kaj multe disdividita. Tie la Entvaŝo enfluas multloke el la arbaro Fangorno okcidente. Ĉirkaŭ tiu fluo, ĉi-flanke de l' Granda Rivero, troviĝas Rohano. Aliflanke estas la senŝirmaj montetoj de Emin Muilo. Tie la vento blovas el la oriento, ĉar ili frontas, trans la Mortigaj Marĉoj kaj Neniesoj, Kirit Gorgoron kaj la nigran pordegon de Mordoro.

» Boromiro kaj tiuj, kiuj lin akompanos serĉante Minason Tirit, prefere lasu la Grandan Riveron super Raŭroso kaj transiru Entvaŝon antaŭ ol ĝi atingos la marĉojn. Tamen ili ne tro longe sekvu tiun fluon, nek risku implikiĝon en la Arbaro Fangorno. Tio estas lando stranga, kaj jam malmulte konata. Sed Boromiro kaj Aragorno sendube ne bezonas tiun averton.

— Vere ni aŭdis pri Fangorno en Minaso Tirit, — diris Boromiro. — Sed tio, kion mi aŭdis, ŝajnas al mi plejparte klaĉoj de maljunulinoj, tiaj, kiajn ni rakontas al niaj infanoj. Ĉio troviĝanta norde de Rohano estas jam tiel malproksima de ni, ke la fantazio povas libere vagi tie. Antaŭe Fangorno kuŝis rande de nia regno; sed jam pasis vivoj de multaj homoj

post kiam ĝin vizitis iu el ni, por pruvi aŭ malpruvi la legendojn hereditajn de distaj jaroj.

» Mi mem estis sporade en Rohano, sed mi neniam transiris ĝin norde. Kiam oni sendis min kiel kurieron, mi trapasis la Breĉon apud la suboj de la Blankaj Montoj, kaj transiris Isenon kaj Grizinundon en nordon. Longa enuiga vojaĝo. Mil ducent mejlojn mi taksis ĝin, kaj tio okupis min dum multaj monatoj; ĉar mi perdis mian ĉevalon en Tarbado, dum trapaso de Grizinundo. Post tiu vojaĝo, kaj la vojo, kiun mi trapaŝis kun tiu ĉi Kunularo, mi ne multe dubas, ke mi trovos vojon tra Rohano, kaj ankaŭ tra Fangorno, se necese.

— Do ne necesas, ke mi diru pli, — diris Celeborno. — Sed ne malestimu la saĝaĵon devenintan de l' distaj jaroj; ĉar ofte povas okazi, ke la maljunulinoj retenas memore sciigon pri aferoj iam necesaj por la saĝula kono.

Nun Galadriela stariĝis de sur la herbo, kaj preninte pokalon de unu el siaj junulinoj ŝi plenigis ĝin per medo kaj donis ĝin al Celeborno.

— Jam estas horo trinki la adiaŭan tason, — ŝi diris. — Trinku, Sinjoro de Galadrimoj! Kaj ne malĝoju via koro, kvankam nokto devas sekvi tagmezon, kaj nia vespero jam proksimiĝas.

Poste ŝi alportis la pokalon al ĉiu el la Kunularo, kaj petis ilin trinki kaj adiaŭi. Sed kiam ili estis trinkintaj, ŝi ordonis, ke ili residiĝu sur la herbo, kaj seĝoj estis metitaj por ŝi kaj por Celeborno. Ŝiaj junulinoj staris silentaj ĉirkaŭ ŝi, kaj dum kelka tempo ŝi rigardis siajn gastojn. Finfine ŝi denove ekparolis.

— Ni trinkis la adiaŭan tason, — ŝi diris, — kaj la ombroj estiĝas inter ni. Sed antaŭ via foriro, mi kunportis en mia ŝipo donacojn, kiujn la Sinjoro kaj Damo de Galadrimoj nun proponas al vi memore pri Lotlorieno. — Poste ŝi alvokis ĉiun laŭvice.

— Jen estas la donaco de Celeborno kaj Galadriela al la estro de via Kunularo, — ŝi diris al Aragorno, kaj ŝi donacis al li ingon, kiu estis farita laŭmezure por lia glavo. Ĝi estis ornamita per retaĵo de floroj kaj folioj verkitaj per arĝento kaj oro, kaj sur ĝi estis skribita per elfaj runoj formitaj el multaj gemoj la nomo Andurilo kaj la deveno de la glavo.

— La glavo eligita el tiu ĉi ingo ne estos makulita aŭ rompita eĉ en malvenko, — ŝi diris. — Sed ĉu ion alian vi deziras de mi antaŭ la disiĝo? Ĉar mallumo fluos inter ni, kaj eble ni neniam plu renkontiĝos, krom eventuale en la fora malproksimo sur vojo, kiu ne permesas retroiron.

Kaj Aragorno respondis:

— Damo, vi scias mian deziron, kaj longe kuratoris la solan trezoron, kiun mi serĉas. Tamen ĝin vi ne rajtas doni al mi, eĉ se vi volus; kaj nur tra

mallumo mi alvenos ĝin.

— Tamen eble tio ei malpezigos vian koron, — diris Galadriela; — ĉar ĝi estis lasita en mia prizorgo, ke mi donu ĝin al vi, se vi trapasus tiun ĉi landon.

Poste ŝi levis el sia sino grandan gemon klare verdan, muntitan sur arĝenta broĉo simila al aglo kun etenditaj flugiloj; kaj kiam ŝi levis ĝin, la gemo flagris kiel la suno brilanta tra la printempa foliaro.

— Tiun ĉi gemon mi donis al mia filino Celebriana, kaj ŝi al sia, kaj nun ĝi venas al vi kiel signo de espero. En tiu ĉi horo akceptu la nomon antaŭdiritan por vi, Elesaro, la Elfgemo de l' domo de Elendilo!

Tiam Aragorno prenis la gemon kaj pinglis la broĉon ĉe sia brusto, kaj la alrigardantoj miris; ĉar pli frue ili ne konstatis, kiom alta kaj reĝeca li staris, kaj ŝajnis al ili, ke forfalis de sur liaj ŝultroj multaj jaroj da penado.

— Pro la donacoj, kiujn vi donis al mi, mi vin dankas, — li diris, — ho, Damo de Lorieno, el kiu naskiĝis Celebriana kaj Arvena Vesperstelo. Kion pli laŭdan mi povus diri?

La Damo klinis sian kapon kaj turnis sin al Boromiro, kaj al li ŝi donacis oran zonon; kaj al Gaja kaj Grinĉjo ŝi donacis etajn arĝentajn zonojn, kiuj havis po agrafon laŭ formo de ora floro. Al Legolaso ŝi donacis pafarkon tian, kian uzas Galadrimoj, pli longan kaj pli fortikan ol la pafarkoj de Mornarbaro, kun kordo el elfaj haroj. Kun ĝi estis plena sagujo.

— Por vi, eta ĝardenisto kaj arbamanto, — ŝi diris al Sam, — mi havas nur donaceton. — Ŝi enmanigis al li skatoleton el ordinara griza ligno, senornaman escepte de unuopa arĝenta runo sur la kovrilo. — Tie estas metita *G* por Galadriela, — ŝi diris, — sed vialingve ĝi povas signifi ĝardenon. En tiu skatolo estas grundo el mia fruktarbaro, kaj akompanas ĝin tiom da benado, kiom Galadriela ankoraŭ kapablas disponigi. Ĝi ne subtenos vin survoje, nek defendos vin kontraŭ iu ajn danĝero; sed se vi gardos ĝin kaj vidos denove vian hejmon en la fino, tiam eble ĝi rekompencos vin. Eĉ se vi trovos ĝin tute malfekunda kaj dezertigita, tamen malmultaj ĝardenoj en Mez-Tero floros kiel via ĝardeno, se vi tie disĵetos tiun ĉi grundon. Tiam vi eble rememoros Galadrielan kaj ekvidos malproksiman Lorienon, kiun vi vidis nur dum nia vintro, ĉar forpasis nia printempo kaj nia somero, kaj ili neniam plu estos vidataj sur la tero krom en memoro.

Sam ruĝiĝis ĝisorele kaj murmuris ion neaŭdeblan, dum li kroĉis la skatolon kaj riverencis laŭeble ĝentile.

— Kaj kian donacon petus gnomoj de la elfoj? — diris Galadriela, sin turninte al Gimlio.

— Neniun, Damo, — respondis Gimlio. — Sufiĉas, ke mi vidis la

Damon de Galadrimoj, kaj aŭdis ŝiajn mildajn vortojn.

— Aŭdu, ĉiuj elfoj! — ŝi kriis al la ĉirkaŭstarantoj. — Neniam denove oni diru, ke la gnomoj estas avaraj kaj malĝentilaj! Tamen certe, Gimlio, filo de Gloino, vi deziras ion, kion mi povus doni? Nomu ĝin, mi ordonas al vi! Vi ne estos la sola gasto sen donaco.

— Ekzistas nenio, Damo Galadriela, — diris Gimlio, profunde riverencante kaj balbutante. — Nenio, krom eble... krom, se estas permesate peti, ne, nomi unuopan vian haron, kiu superas la oron de la tero kiel la steloj superas la gemojn de la minejo. Mi ne petas tian donacon. Sed vi ordonis, ke mi nomu mian deziron.

La elfoj moviĝetis kaj murmuris pro miro, kaj Celeborno rigardis mire la gnomon, sed la Damo ridetis.

— Oni diras, ke la lerto de la gnomoj troviĝas en iliaj manoj, sed ne sur iliaj langoj, — ŝi diris, — tamen tio ne veras pri Gimlio. Ĉar neniu iam ajn starigis al mi peton tiom aŭdacan kaj tamen tiom ĝentilan. Kaj kiel mi rifuzu, ĉar mi ordonis, ke li parolu? Sed diru al mi, kion vi farus kun tia donaco?

— Zorge konservus ĝin, Damo, — li respondis, — memore pri viaj vortoj al mi je nia unua renkontiĝo. Kaj se mi iam revenos al la forĝejoj de mia hejmo, ĝi estos muntita en nepereonta kristalo por esti familia heredaĵo, kaj promeso pri bonaj rilatoj inter la Monto kaj la Arbaro ĝis la fino de la tagoj.

Tiam la Damo malplektis unu el siaj longaj harplektaĵoj, kaj fortranĉis tri orajn harojn, kaj metis ilin sur la manplaton de Gimlio.

— Jenaj vortoj iru kun la donaco, — ŝi diris. — Mi nenion antaŭdiras, ĉar ĉiu antaŭdirado estas jam vana: unuflanke troviĝas mallumo, kaj aliflanke nur espero. Sed se espero ne malvenkos, tiam mi diras al vi, Gimlio, filo de Gloino, ke al viaj manoj fluos oro, kaj tamen oro vin neniel regos.

— Kaj vi, Ringoportanto, — ŝi diris, turniĝinte al Frodo. — Mi venas laste al vi, kiu ne lastas en miaj pensoj. Por vi mi preparis tion ĉi. — Ŝi alte tenis kristalan flakoneton: ĝi ekbrilis kiam ŝi movis ĝin, kaj radioj blanklumaj ekflagris el ŝia mano. — En tiu ĉi flakoneto estas kaptita la lumo de l' stelo de Erendilo, enmetita en akvon de mia fontano. Ĝi lumos pli brile, kiam nokto ĉirkaŭos vin. Ĝi estu por vi lumo en lokoj malhelaj, kiam ĉiuj aliaj lumoj estingiĝos. Memoru Galadrielan kaj ŝian Spegulon!

Frodo akceptis la flakoneton, kaj momente ĝi lumis inter ili, li vidis ŝin denove staranta kiel reĝino, granda kaj bela, sed ne plu timiga. Li riverencis, sed trovis neniujn dirotajn vortojn.

Nun la Damo leviĝis, kaj Celeborno rekondukis ilin ĝis la kajo. Flava

tagmezo surkuŝis la verdan teron de la terstrio, kaj la akvo ekbrilis arĝente. Finfine ĉio estis pretigita. La Kunularo okupis siajn lokojn en la boatoj kiel antaŭe. Kriante adiaŭon, la elfoj de Lorieno per longaj grizaj stangoj puŝis ilin sur la fluantan riveron, kaj la ondetiĝaj akvoj malrapide forportis ilin. La vojaĝantoj sidis senmove kaj senparole. Sur la verda bordo ĉe la fino de l' terstrio staris sola kaj silenta Damo Galadriela. Pasante ŝin, ili turniĝis kaj iliaj okuloj rigardis ŝin malrapide forflosanta de ili. Ĉar al ili ŝajnis, ke Lorieno retroglisas, kvazaŭ hela ŝipo mastita per sorĉitaj arboj, velante plu al forgesitaj bordoj, dum ili sidis senhelpe sur la rando de l' griza kaj senfolia mondo.

Ĝuste dum ili rigardis, Arĝentvejno pasis al la kurentoj de la Granda Rivero, kaj iliaj boatoj turniĝis kaj ekrapidis suden. Baldaŭ la blanka figuro de la Damo estis eta kaj malproksima. Ŝi brilis kvazaŭ vitra fenestro sur fora monteto sub la okcidentiĝa suno, aŭ kvazaŭ fora lago vidata de sur monto: kristalo falinta en la sinon de la lando. Tiam ŝajnis al Frodo, ke ŝi levis siajn brakojn je fina adiaŭo, kaj malproksime sed akre-klare laŭ la sekvanta vento aŭdiĝis sono de ŝia kantanta voĉo. Sed nun ŝi kantis en la antikva lingvo de la transmaraj elfoj, kaj la vortojn li ne komprenis: bela estis la muziko, sed ĝi ne konsolis lin.

Tamen, kiel kutime pri elfaj vortoj, ili restis gravuritaj en lia memoro, kaj longe poste li interpretis ilin, tiel trafe kiel li kapablis: la lingvo estis tiu de elfa kantado kaj priparolis aferojn malmulte konatajn sur Mez-Tero.

Ai! laurië lantar lassi súrinen,
yéni únótimë ve rámar aldaron!
Yéni ve lintë yuldar avánier
mi oromardi lisse-miruvóreva
Andúnë pella, Vardo tellumar
nu luini yassen tintilar i eleni
ómaryo airetári-lírinen.

Sí man i yulma nin enquantuva?

An sí Tintallë Varda Oiolossëo
ve fanyar máryat Elentári ortanë,
ar ilyë tier undulávë lumbulë;
ar sindanóriello caita mornië
i falmalinnar imbë met, ar hísië
untúpa Calaciryo míri oialë.
Sí vanwa ná, Rómello vanwa, Valimar!

Namárië! Nai hiruvalyë Valimar.

Nai elyë hiruva. Namárië!

Aĥ! kiel orofalas la folioj en la vento! Kaj sennombraj kiel la aloj de arboj estas la jaroj. La jaroj forpasis kiel dolĉaj rapidaj glutoj de blanka medo en haloj preter la okcidento sub la bluaj kupoloj de Varda[8], kie la steloj tremas pro la kantemo en ŝia voĉo, sankta kaj reĝineca. Kiu nun replenigos por mi la pokalon? Ĉar jam la Lumiganto, Varda, Reĝino de l' Steloj, de Monto Ĉiamblanka supren levis siajn manojn kvazaŭ nubojn, kaj ĉiuj vojoj dronis en ombroj, kaj el griza lando mallumo kuŝiĝis sur la ŝaŭmaj ondoj inter ni, kaj nebulo kovris la juvelojn de Kalacirjo poreterne. Jam perdita, perdita al ĉiuj en la Oriento estas Valimaro! Adiaŭ! Eble vi trovos Valimaron, Eble ĝuste vi trovos ĝin. Adiaŭ!

Subite la Rivero abruptis ĉirkaŭ kurbiĝon, kaj la bordoj altiĝis ambaŭflanke, kaj la lumo de Lorieno estis kaŝita. Neniam plu Frodo vidis tiun belan landon.

La vojaĝantoj nun turnis siajn vizaĝojn al la vojaĝo; la suno estis antaŭ ili, kaj iliaj okuloj estis blindigitaj, ĉar ĉiuj estis larmoplenaj. Gimlio malkaŝe ploris.

— Mi rigardis lastan fojon tion, kio estas la plej bela, — li diris al sia kunulo Legolaso. — De nun mi taksos nenion bela, krom ŝian donacon. — Li metis manon al sia brusto. — Diru al mi, Legolaso, kial mi venis al tiu ĉi Celo? Mi tute ne konstatis, kie troviĝos la ĉefa danĝero! Elrondo parolis vere, kiam li diris, ke ni ne povas antaŭvidi tion, kion ni eble renkontos survoje. Turmento en la mallumo estis la danĝero, kiun mi timis, kaj tio ne retenis min. Sed mi ne estus veninta, se mi konus la danĝeron de lumo kaj ĝojo. Nun tiu ĉi disiĝo plej grave vundis min, eĉ se mi irus ĉi-nokte rekte al la Malhela Mastro. Ve por Gimlio, filo de Gloino!

— Ne! — diris Legolaso. — Ve por ni ĉiuj! Kaj por ĉiuj mondloĝantoj dum ĉi tiuj postaj tagoj. Ĉar tiel statas la afero: trovi kaj perdi, kiel ŝajnas al tiuj, kies boato estas sur la fluanta rivero. Sed mi taksas vin benita, Gimlio, filo de Gloino: ĉar vian perdon vi spertas propravole, kaj vi povis elekti alimaniere. Sed vi ne forlasis viajn kunulojn, kaj la minimuma rekompenco, kiun vi havos, estas, ke la memoro pri Lotlorieno restos ĉiam klara kaj senmakula en via koro, kaj neniam velkos aŭ malfreŝiĝos.

— Eble, — diris Gimlio, — kaj mi dankas vin pro viaj vortoj. Veraj vortoj sendube; sed tia konsolado tute fridas. Ne memoron la koro deziras. Tio estas nur spegulo, eĉ se klara kiel Ĥeled-Zaramo. Aŭ tion diras la koro de la gnomo Gimlio. Elfoj eble vidas alimaniere. Efektive, mi aŭdis, ke por ili memoro pli similas la vivan mondon ol sonĝon. Ne tiel por gnomoj.

» Sed ni ne plu parolu pri tio. Atentu la boaton! Ĝi tro malaltas sur la

akvo pro ĉiuj ĉi pakaĵoj, kaj la Granda Rivero estas rapida. Mi ne volas dronigi mian malĝojon en malvarma akvo. — Li prenis remilon, kaj direktis la boaton al la okcidenta bordo, sekvante la boaton de Aragorno, kiu jam formoviĝis el la rivermezo.

Tiel la Kunularo iris sian longan vojon, laŭ la larĝa rapidanta rivero, portate ĉiam suden. Nudaj arbaroj etendiĝis ambaŭborde, kaj ili ne povis ekvidi la terenojn malantaŭe. La venteto formortis kaj la Rivero fluis senbrue. Neniu birda voĉo rompis la silenton. La suno nebuliĝis dum la tago maljuniĝis, ĝis ĝi glimis sur pala ĉielo kvazaŭ alta blanka perlo. Poste ĝi velkis okcidenten, kaj krepuskiĝis frue, sekvate de griza kaj senstela nokto. Longe dum la malhelaj kvietaj horoj ili flosis antaŭen, direktante siajn boatojn sub la suprependantajn ombrojn de l' okcidentaj arbaroj. Arbegoj preterpasis fantomece, ŝovante siajn torditajn soifajn radikojn tra la nebulo suben en la akvon. Estis morne kaj malvarme. Frodo sidis aŭskultante la malfortan plaŭdadon kaj lirladon de la Rivero malpaciencanta inter la arbradikoj kaj flosligno proksime al la bordo, ĝis lia kapo kliniĝis kaj li eniris maltrankvilan dormon.

9

La Granda Rivero

Frodon vekis Sam. Li konstatis, ke li kuŝas, varme volvite, sub altaj grizhaŭtaj arboj en kvieta angulo de arbaro sur la okcidenta bordo de la Granda Rivero Anduino. Li tradormis la nokton, kaj la matena grizo malbrilis inter la nudaj branĉoj. En la proksimo Gimlio okupiĝis pri eta fajro.

Ili ekiris denove antaŭ ol plene tagiĝis. La plimultaj el la Kunularo vere ne entuziasmis pri rapidado suden: ili kontentis, ke la decido, kiun ili devos fronti plej malfrue kiam ili alvenos Raŭroson kaj la Tindrokan Insulon, necesos nur post kelkaj tagoj; kaj ili lasis la Riveron porti ilin siarapide, ne dezirante hasti al la danĝeroj preterkuŝantaj, negrave kiun vojon ili elektos finfine. Aragorno permesis al ili drivi sur la fluo laŭ ilia deziro, rezervante ilian forton antaŭ estonta laceco. Sed li insistis, ke ili almenaŭ ekiru frue ĉiun tagon kaj vojaĝu profunde en la vesperon; ĉar li sentis en la koro, ke tempo urĝas, kaj li timis, ke la Malluma Mastro ne maldiligentis dum ili restadis en Lorieno.

Tamen ili vidis neniun indikon pri malamikoj en tiu tago, nek en la posta. Pasis la malviglaj grizaj horoj sen okazaĵo. Kiam la tria tago de l' vojaĝo postzenitis, la tereno malrapide ŝanĝiĝis: la arboj maldensiĝis kaj poste tute malaperis. Sur la orienta bordo maldekstre ili vidis longajn senformajn deklivojn etendiĝantajn supren kaj foren al la ĉielo; brunaj kaj ŝrumpintaj ili aspektis, kvazaŭ fajro transpasis ilin, postlasinte neniun verdan herberon: dezertejo neamika sen eĉ rompita arbo aŭ elstara ŝtono por mildigi la malplenon. Ili atingis la Brunajn Terenojn, kiuj etendiĝis, vastaj kaj izolaj, inter Suda Mornarbaro kaj la montetoj de Emin Muilo. Kia pesto, milito aŭ misago de l' Malamiko estis detminta tiun regionon, ne povis konjekti eĉ Aragorno.

Ankaŭ en la okcidento dekstre la tereno estis senarba, sed ĝi estis ebena, kaj multloke verda kun larĝaj herbejoj. Je tiu flanko de l' Rivero ili preterpasis arbarojn de grandaj fragmitoj, tiom altaj, ke ili forbaris vidadon okcidenten, dum la boatetoj siblis antaŭen apud iliaj vibrantaj randoj. Iliaj malhelaj velkintaj frondoj kliniĝis kaj balanciĝis en la malvarmaj ventetoj, siblante mallaŭte kaj triste. Ie-tie tra breĉetoj Frodo povis ekvidi ondformajn herbejojn, kaj malproksime post ili montetojn en la sunsubiro, kaj tre fore je

rando de l' vidpovo malhelan linion, kie marŝis la plej sudaj vicoj de la Nebulecaj Montoj.

Vidiĝis neniu signo de vivantaĵoj, krom birdoj. Tiuj estis multaj: etuloj fajfantaj kaj pepantaj inter la karikoj, sed ili malofte videblis. Okaze la vojaĝantoj aŭdis siblon kaj kriĉon de cignoflugiloj, kaj suprenrigardante ili vidis falangegon striantan sur la ĉielo.

— Cignoj! — diris Sam. — Kaj grandegaj cetere!

— Jes, — diris Aragorno, — kaj ili estas nigraj.

— Kiom vasta, malplena kaj morna aspektas ĉi tuta regiono! — diris Frodo. — Mi ĉiam supozis, ke ju pli oni vojaĝas suden, des pli varmiĝas kaj gajiĝas, ĝis la vintron oni postlasas por ĉiam.

— Sed ni ankoraŭ ne tre suden vojaĝis, — respondis Aragorno. — Ankoraŭ vintras, kaj ni malproksimas de la maro. Ĉi tie la mondo malvarmas ĝis printempiĝo, kaj povas esti, ke ni spertos denove neĝon. Tre malproksime ĉe la golfo Belfalaso, al kiu fluas la Anduino, estas varme kaj gaje, eble, aŭ estus tiel se ne ekzistus la Malamiko. Sed ĉi tie ni troviĝas ne pli ol cent okdek mejlojn, mi supozas, sude de Sud-kvarono en via fora Provinco, je plurcent longaj mejloj tiudirekten. Vi rigardas nun sud-okcidenten trans la nordajn terenojn de Markio, Rohano la regno de la ĉevalmastroj. Postnelonge ni alvenos la elfluejon de la Limlumo, kiu defluas el Fangorno aliĝe al la Granda Rivero. Tiu estas la norda limo de Rohano; kaj pratempe ĉio etendiĝanta inter Limlumo kaj la Blankaj Montoj apartenis al la Rohananoj. Tio estas lando fekunda kaj agrabla, kaj ĝia herbo estas senrivala; sed dum tiuj ĉi tagoj misaj la homoj ne loĝas apud la Rivero kaj malofte rajdas ĝis ties bordoj. Anduino estas larĝa, tamen la orkoj kapablas pafi siajn sagojn malproksime trans la fluon; kaj lastatempe, oni diras, ili kuraĝis transiri la akvon kaj ŝteli gregojn kaj generĉevalojn de Rohano.

Sam rigardis de bordo al bordo maltrankvile. Antaŭe la arboj ŝajnis malamikaj, kvazaŭ ili enhavus sekretajn okulojn kaj embuskantajn danĝerojn; nun li sopiris ĉeeston de la arboj. Al li ŝajnis, ke la Kunularo estas tro senŝirma, flosanta en boatetoj apertaj meze de terenoj senprotektaj, sur rivero, kiu estas limregiono de milito.

Dum la postaj unu-du tagoj, kiam ili pluiris, portataj seninterrompe suden, tiu sento de malsekureco plifortiĝis inter la tuta Kunularo.

Dum unu tuta tago ili prenis siajn remilojn kaj rapidis antaŭen. La bordoj preterglitis. Baldaŭ la Rivero plilarĝiĝis kaj malpli profundiĝis; longaj ŝtonozaj strandoj kuŝis oriente, kaj en la akvo troviĝis grizaj malprofundaĵoj, tiel ke zorgema stirado necesis. La° Brunaj Terenoj altiĝis je mornaj montetaroj, trans kiuj blovis el la oriento frosta aero. Aliflanke la

herbejoj iĝis ondiĝantaj teramasoj kun ŝrumpinta herbo meze de tereno marĉeja kaj tufa. Frodo ektremetis, pensante pri la razenoj kaj fontanoj, klara sunlumo kaj mildaj pluvoj de Lotlorieno. Malmulte oni parolis kaj neniom ridis en iu ajn el la boatoj. Ĉiu ano de l' Kunularo okupiĝis pri la propraj pensoj.

La koro de Legolaso kuris sub la steloj de somera nokto en iu norda maldensejo inter la fagaroj; Gimlio palpadis mense oron, kaj konsideris, ĉu ĝi taŭgas por prilaboro kiel muntaĵo por la donaco de la Damo. Gaja kaj Grinĉjo en la meza boato estis netrankvilaj, ĉar Boromiro sidis murmurante al si, foje mordante siajn ungojn, kvazaŭ ia malaplombo aŭ dubo lin konsumis, foje kaptante remilon kaj pelante la boaton proksimen al tiu de Aragorno. Poste Grinĉjo, kiu sidis ĉe la pruo, retrorigardante ekvidis strangan ekbrilon en liaj okuloj, kiam li fiksrigardis antaŭen al Frodo. Sam jam antaŭlonge decidis, ke, kvankam boatoj eble ne estas tiom danĝeraj, kiom li estis edukita kredi, ili estas multe pli malkomfortaj ol li eĉ imagis. Li estis enpremita kaj mizera, disponante neniun okupiĝon krom rigardado al la terenoj preterrampantaj kaj la griza akvo ambaŭflanke. Eĉ kiam la remiloj estis uzataj, oni ne riskis havigi unu al Sam.

Kiam krepuskiĝis la kvaran fojon, li estis retrorigardanta trans la klinitajn kapojn de Frodo kaj Aragorno, kaj la sekvantajn boatojn; li estis dormema kaj sopiris kampadon kaj senton de tero sub la piedfingroj. Subite io altiris lian atenton: komence li rigardis ĝin malvigle, poste li rektiĝis kaj frotis siajn okulojn, sed kiam li denove alrigardis, li jam ne povis ĝin vidi.

Ili tranoktis sur insuleto proksima al la okcidenta bordo. Volvite en lankovriloj, Sam kuŝis apud Frodo.

— Mi spertis kuriozan sonĝon iom antaŭ ol ni haltis, s-ro Frodo, — li diris. — Aŭ eble tio ne estis sonĝo. Kurioza ĝi estis ĉiuokaze.

— Nu, kia ĝi estis? — diris Frodo, sciante ke Sam ne trankviliĝos antaŭ ol rakonti sian historion, kia ajn ĝi estus. — Mi nek vidis, nek pripensis ion ridetindan de kiam ni forlasis Lotlorienon.

— Ĝi ne kuriozis ridetige, s-ro Frodo. Ĝi estis stranga. Tute misa, se tio ne estis sonĝo. Kaj prefere vi aŭdu ĝin. Okazis jene: Mi vidis ŝtipon kiu havis okulojn!

— En ordo pri la ŝtipo, — diris Frodo. — Ili abundas en la Rivero. Sed rezignu pri la okuloj!

— Tion mi ne rezignos, — diris Sam. — Ĝuste la okuloj vigligis min, por tiel diri. Mi vidis ion, kion mi supozis ŝtipo, flosantan antaŭen en la duonlumo malantaŭ la boato de Gimlio; sed mi ne multe atentis ĝin. Poste ŝajnis al mi, ke la ŝtipo grade proksimiĝas al ni. Kaj tio estis stranga, oni povus diri, pro tio, ke ni ĉiuj kune flosis laŭ la fluo. Ĝuste tiam mi ekvidis la

okulojn: du palaj kvazaŭpintoj, iom briletaj, sur elstaraĵo je la pli proksima fino de la ŝtipo. Cetere, tio ne estis ŝtipo, ĉar ĝi havis padelpiedojn, preskaŭ cignecajn, tamen ili ŝajnis pli grandaj, kaj daŭre trempiĝis en kaj el la akvon.

» Tiam mi sidiĝis rekte kaj frotis miajn okulojn, intencante eligi krion, se ĝi estus ankoraŭ tie, kiam mi estus elfrotinta la dormemon el mia kapo. Ĉar la kio-ajn-ĝi-estis jam alvenis rapide kaj apudiĝis malantaŭ Gimlio. Sed ĉu tiuj du lampoj vidis min moviĝi kaj alrigardi, aŭ ĉu mi konsciiĝis, mi ne scias. Kiam mi denove rigardis, ĝi ne ĉeestis. Tamen ŝajnas al mi, ke mi ekvidis, per okulangulo, kiel oni diras, ion malhelan, kiu pafiĝis sub la ombron de l' bordo. Mi ne plu vidis okulojn, tamen.

» Mi diris al mi: "sonĝas denove, Sam Vato", kaj mi diris nenion pli tiutempe. Sed poste mi pensadis, kaj jam ne tiom certas. Kion vi opinias pri tio, s-ro Frodo?

— Mi opinius nenion krom ŝtipo, krepusko kaj viaj dormemaj okuloj, Sam, — diris Frodo, — se tio estus la unua fojo, kiam tiuj okuloj estus viditaj. Sed ne estas tiel. Mi vidis ilin malantaŭe en la nordo antaŭ ol ni alvenis Lorienon. Kaj mi vidis strangan kreaĵon grimpanta al la *fleto* tiunokte. Ankaŭ Haldiro vidis ĝin. Kaj ĉu vi memoras la raporton de la elfoj, kiuj persekutis la orkaron?

— Ha, — diris Sam, — tion jes; kaj mi memoras ankoraŭ pli. Al mi ne plaĉas miaj pensoj, sed pripensinte tion kaj alion, rakontojn de s-ro Bilbo kaj tiel plu, mi kredas, ke mi povus nomi tiun kreaĵon, konjekte. Nomo malbela. Golumo, eble?

— Jes, ĝuste tion mi timis jam dum kelka tempo, — diris Frodo. — Ekde tiu nokto sur la *fleto*. Mi supozas, ke li embuskis en Morio, kaj tie kontaktiĝis kun nia spuro; sed mi esperis, ke nia restado en Lorieno denove mistifikus lin. La mizera kreaĵo certe kaŝis sin en la arbaroj apud Arĝentvejno, kaj gvatis nian ekvojaĝon!

— Proksimume tiel, — diris Sam. — Kaj prefere ni estu iom pli gvatemaj mem, aŭ ni sentos fiajn fingrojn ĉirkaŭ niaj koloj en iu proksima nokto, se entute ni vekiĝos por ion ajn senti. Kaj ĝuste tion mi celis. Ne necesas ĝeni Paŝegulon aŭ la aliajn hodiaŭ nokte. Mi vaĉos. Mi povos dormi morgaŭ, estante ne pli ol pakaĵo en boato, kiel oni povas diri.

— Mi povas, — diris Frodo, — kaj mi eble dirus "pakaĵo kun okuloj". Vi ja vaĉu; sed nur kondiĉe, ke vi promesas veki min duontempe al la mateno, se okazos nenio antaŭ tiam.

Malfrunokte Frodo eliĝis el profunda malhela dormo kaj konstatis, ke Sam skuas lin.

— Estas domaĝe vin veki, — flustris Sam, — sed tion vi ja diris. Nenio

raportindas aŭ malmulto. Mi pensis aŭdi mallaŭtan plaŭdon kaj snufan sonon antaŭ kelka tempo; sed aŭdeblas multaj tiaj strangaj sonoj apud la rivero nokte.

Li kuŝiĝis, kaj Frodo rektiĝis, volvite en siaj lankovriloj, kaj kontraŭbatalis la dormemon. Minutoj aŭ horoj pasis malrapide, kaj nenio okazis. Frodo estis ĝuste cedonta al la tento denove kuŝiĝi, kiam malhela figuro, apenaŭ videbla, flosis proksimen al unu el la albordigitaj boatoj. Longa blankeca mano estis neklare videbla, kiam ĝi etendiĝis kaj kaptis la boatrandon; du palaj lampsimilaj okuloj brilis malvarme dum ili rigardis enen, kaj poste ili turniĝis supren kaj rigardis al Frodo sur la insuleto. Ili ne pli ol unu-du paŝojn malproksimis, kaj Frodo aŭdis sibleton de enspiro. Li stariĝis, elingigante Pikon, kaj frontis la okulojn. Tuj ties lumo estingiĝis. Aŭdiĝis alia siblo kaj plaŭdo, kaj la malhela ŝtipformo forpafiĝis laŭflue en la nokton. Aragorno moviĝis dumdorme, turnis sin, kaj eksidiĝis.

— Pri kio temas? — li flustris, saltleviĝante kaj venante al Frodo. — Mi sentis ion dum la dormo. Kial vi elingigis vian glavon?

— Golumo, — respondis Frodo. — Aŭ almenaŭ tion mi konjektas.

— Ha! — diris Aragorno. — Do vi scias pri nia eta embuskulo, ĉu? Li plandis malantaŭ ni tra l' tuta Morio kaj eĉ ĝis Nimrodelo. De kiam ni enboatiĝis, li kuŝis sur ŝtipo kaj padelis mane kaj piede. Mi unu-du fojojn provis kapti lin nokte; sed li pli ruzas ol vulpo, kaj fiŝe forglitemas. Mi esperis, ke la rivervojaĝo venkos lin, sed li estas tro lerta naviganto.

» Ni devos provi pli rapidan iradon morgaŭ. Kuŝu nun, kaj mi vaĉos dum la restaĵo de la nokto. Mi volus kapti tiun mizerulon. Ni eble povus utiligi lin. Sed se tion mi ne sukcesos, ni devos klopodi por forskui lin. Li estas tre danĝera. Senkonsidere pri dumnokta murdo proprakonte, li eble atentigos eventualajn malamikojn pri nia vojiro.

La nokto forpasis sen ke Golumo montris denove eĉ ombron. Post tio la Kunularo tre atente vaĉadis, sed nenion pli ili vidis de Golumo dum la daŭro de l' vojaĝo. Se li ankoraŭ persekutis, li estis tre singarda kaj ruza. Pro ordono de Aragorno ili nun remis dum longaj periodoj, kaj la bordoj preteriris rapidege. Sed ili malmulte vidis la terenon, ĉar ili vojaĝis plejparte nokte kaj krepuske, ripozante dumtage, kaj kuŝante tiom kaŝite, kiom permesis la tero. Tiumaniere la tempo pasis ĝis la sepa tago.

La vetero estis daŭre griza kaj nuba, kun vento el la oriento, sed kiam la vespero noktiĝis la ĉielo okcidente sennubiĝis, kaj flakoj da malhela lumo, flava kaj pale verda, aperis sub la grizaj nubobordoj. Tie la blanka ŝelo de l' nova Luno estis videbla glimante en la foraj lagoj. Sam rigardis ĝin kaj sulkigis sian frunton.

La postan tagon la tereno ambaŭflanke komencis ŝanĝiĝi rapide. La

bordoj komencis altiĝi kaj iĝi ŝtonozaj. Baldaŭ ili trapasis montetan rokecan terenon, kaj sur ambaŭ bordoj troviĝis apikaj deklivoj enprofundigitaj sub arbustoj de domo kaj prunelo, interplektitaj per rubusoj kaj ampelopsoj. Malantaŭ tiuj staris malaltaj diseriĝemaj klifoj, kaj fendaĵoj el griza vetertrivita ŝtono hedermalhela; kaj malantaŭ tiuj leviĝis altaj firstoj, kronitaj per venttorditaj abioj. Oni proksimiĝis al la griza monteta tereno de Emin Muilo, la suda bordo de Sovaĝujo.

Multaj birdoj frekventis la klifojn kaj la rokfendetojn, kaj la tutan tagon alte sur la ĉielo cirkulis birdaroj, nigraj kontraŭ la pala ĉielo. Dum ili kuŝis en sia kampejo tiun tagon, Aragorno rigardis la flugadojn dubeme, scivolante ĉu Golumo plenumis iun misaĵon kaj sciigo pri ilia vojaĝo jam disvastiĝis en la sovaĝejo. Poste, kiam la suno subiris kaj la Kunularo moviĝis kaj pretigis sin ekvojaĝi denove, li rimarkis malhelan makulon kontraŭ la velkanta lumo: birdegon alte kaj malproksime, jen cirkulante, jen plu flugante malrapide suden.

— Kio estas tio, Legolaso? — li demandis, indikante la nordan ĉielon. — ĉu tio, kiel mi supozas, estas aglo?

— Jes, — diris Legolaso. — Tio estas aglo, ĉasanta aglo. Mi scivolas, kion tio antaŭdiras. Ĝi estas malproksime de l' montoj.

— Ni ne ekiros antaŭ plena mallumo, — diris Aragorno.

La oka nokto de l' vojaĝo alvenis. Estis jam silente kaj senvente; la griza orienta vento jam forpasis. La maldika krescento de la Luno estis frue falinta en la palan sunsubiron, sed la ĉielo estis klara supre, kaj kvankam tre malproksime en la sudo troviĝis grandaj amasoj da nuboj, kiuj ankoraŭ rebrilis nehele, okcidente steloj brile glimis.

— Ek! — diris Aragorno. — Ni riskos ankoraŭ unu noktan vojaĝon. Ni alvenas regionojn de la Rivero, kiujn mi ne bone konas: ĉar mi neniam antaŭe vojaĝis surakve tie ĉi, ne inter tie ĉi kaj la torentoj de Sarn Gebiro. Sed se mi ĝuste kalkulas, tiuj estas ankoraŭ multajn mejlojn antaŭ ni. Tamen troviĝas lokoj danĝeraj eĉ antaŭ ol ni venos tien: rokoj kaj ŝtonaj insuletoj en la fluo. Ni devas atente vaĉi kaj ne tro rapide remi.

Al Sam en la unua boato estis donita la vaĉula tasko. Li kuŝis sur la pruo rigardante en la malhelon. La nokto malheliĝis, sed la steloj supre estis strange brilhelaj, kaj sur la supraĵo de l' Rivero estis glimado. Estis preskaŭ noktomezo, kaj ili jam drivis kelkan tempon, apenaŭ uzante la remilojn, kiam subite Sam ekkriis. Nur kelkajn paŝojn antaŭe malhelaj formoj baŭmis en la fluo kaj li aŭdis la kirliĝon de rapidega akvo. Rapida fluo svingiĝis maldekstren, al la orienta bordo, kie la ŝanelo estas senobstakla. Dum ili puŝiĝis flanken la vojaĝantoj povis vidi jam tre proksime la palan ŝaŭmon de l' Rivero vipiĝante kontraŭ akrajn rokojn, kiuj elpuŝiĝis foren en la fluon

kvazaŭ linio de dentoj. La boatoj estis kunkaŭrintaj.

— Atentu, Aragorno! — kriis Boromiro, kiam lia boato frapis la kondukan. — Jen frenezaĵo! Ni ne povas riski la torentojn dumnokte! Sed neniu boato kapablas travivi Sarn Gebiron, ĉu nokte, ĉu tage.

— Retro, retro! — kriis Aragorno. — Turniĝu! Turniĝu se vi povas! — Li plonĝigis sian remilon en la akvon, provante haltigi la boaton kaj ĝin turni.

— Mi miskalkulis, — li diris al Frodo. — Mi ne sciis, ke ni tiom progresis: Anduino fluas pli rapide, ol mi supozis. Sarn Gebiro certe jam proksimas.

Per grandaj klopodoj ili haltigis la boatojn kaj malrapide retroturnis ilin; sed komence ili povis nur pene iri kontraŭ la fluo, kaj la tutan tempon ili estis portataj pli kaj pli proksimen al la orienta bordo. Jam malluma kaj minaca ĝi superombris ilin en la nokto.

— Ĉiuj kune, padelu! — kriis Boromiro. — Padelu! Aŭ ni estos pelataj sur la malprofundaĵon. — Ĝuste kiam li parolis, Frodo sentis sub si la kilon grati sur ŝtono.

Tiumomente aŭdiĝis kordsonoro de pafarkoj: pluraj sagoj superfajfis ilin, kaj iuj falis inter ilin. Unu frapis Frodon inter liaj ŝultroj kaj li skuiĝis antaŭen kriante, forlasante sian remilon: sed la sago retrofalis, malhelpate de lia kaŝita maŝkiraso. Alia trapasis la kapuĉon de Aragorno; kaj tria enpafiĝis en la randon de la dua boato, proksime al la mano de Gaja. Al Sam ŝajnis, ke li vidas nigrajn figurojn kurantaj tien-reen sur la longaj gruzamasoj, kiuj kuŝis sub la orienta bordo. Ili ŝajnis tre proksimaj.

— *Yrch*! — diris Legolaso, ekuzante sian propran lingvon.

— Orkoj! — kriis Gimlio.

— Plenumo de Golumo, mi certas, — diris Sam al Frodo. — Kaj loko bele elektita, cetere. La Rivero ŝajnas decidinta liveri nin rekte al iliaj brakoj!

Ĉiuj klinis sin antaŭen penante per la remiloj: eĉ Sam kunlaboris. Ĉiumomente ili atendis sperti mordon de nigraplumaj sagoj. Multaj kriĉis super ili aŭ trafis la akvon en la proksimo, sed okazis neniuj aliaj trafoj. Estis malhele, sed ne tro malhele al la nokt-okuloj de orkoj, kaj en la stelbrileto ili certe havigis al siaj ruzaj malamikoj ian celon, krom se la grizaj manteloj de Lorieno kaj la griza ligno de la elfaj boatoj malsukcesigis la malicon de l' arkpafistoj de Mordoro.

Puŝon post puŝo ili penadis pluen. En la mallumo estis malfacile esti certa, ke ili entute moviĝis; sed iom post iom la kirliĝo de l' akvo malpliiĝis, kaj la ombro de l' orienta bordo revelkis en la nokton. Finfine, laŭ ilia takso, ili reatingis la mezon de la fluo kaj pelis siajn boatojn reen al

kelka distanco de la elstarantaj rokoj. Tiam duonturniĝinte ili puŝis ilin per sia tuta forto al la okcidenta bordo. Sub la ombro de arbustoj kliniĝantaj super la akvo ili haltis kaj respiris.

Legolaso demetis sian remilon kaj prenis la pafarkon, kiun li kunportis de Lorieno. Poste li salte surteriĝis kaj grimpis kelkajn paŝojn sur la bordo. Noĉinte sian kordon kaj almetinte sagon li sin turnis, rerigardante trans la Riveron en la mallumon. Trans la akvo aŭdiĝis kriĉoj, sed nenio estis videbla.

Frodo suprenrigardis al la elfo, kiu staris alte super li, engvatante en la nokton, serĉante alpafeblan celon. Lia kapo estis malhela, kronita de akraj blankaj steloj, kiuj ekbrilis sur la nigraj flakoj de l' ĉielo malantaŭe. Sed jam, leviĝante kaj alvelante el la sudo, proksimiĝis grandaj nuboj, sendante malhelajn flankrajdantojn sur la stelokampojn. Subita timego kroĉis la Kunularon.

— *Elbereta Giltoniela*! — suspiris Legolaso rigardante supren. Ĝuste tiam malhela figuro, nubsimila tamen ne nuba, ĉar ĝi moviĝis multe pli rapide, venis el la nigreco en la sudo, kaj hastis direkte al la Kunularo, forbarante ĉiun lumon dum la alveno. Baldaŭ ĝi montriĝis granda flugilhava kreaĵo, pli nigra ol la putoj en la nokto. Batalemaj voĉoj ekkrie salutis ĝin el trans la akvo. Frodo sentis subitan froston, kiu kroĉis lian koron; sentiĝis terura frido, kvazaŭ memoro pri malnova vundo, en lia ŝultro. Li kaŭris, kvazaŭ por sin kaŝi.

Subite la granda pafarko de Lorieno muzikis. Kriĉe la sago forlasis la elf-kordon. Frodo rigardis supren. Preskaŭ super lia kapo la flugilhava formo iris flanken. Aŭdiĝis kruda graka kriĉo, dum ĝi falis el la aero, malaperante suben en la mallumon de l' orienta bordo. La ĉielo estis denove pura. Okazis tumulto multvoĉa en la foro, kiu sakris kaj ululis en la mallumo, kaj poste silento. Nek sago nek krio alvenis el la oriento tiunokte.

Post kelka tempo Aragorno regvidis la boatojn kontraŭflue. Ili palpis sian vojon laŭ la akvorando kelkan distancon, ĝis ili trovis etan malprofundan golfeton. Kelkaj malaltaj arboj tie kreskis proksime al la akvo, kaj malantaŭ tiuj leviĝis apika rokoza bordo. Tie la Kunularo decidis resti kaj atendi la tagiĝon: estis senutile klopodi moviĝi pluen dum la nokto. Ili neniel tendumis kaj bruligis neniun fajron, sed kuŝis kunpremite en la boatoj, ligitaj proksime unu al la aliaj.

— Laŭdatu la pafarko de Galadriela, kaj la mano kaj okulo de Legolaso! — diris Gimlio, maĉante oblaton da *lembaso*. — Tio estis potenca pafo en la mallumo, amiko mia!

— Sed kiu povas sciigi, kion ĝi trafis? — diris Legolaso.

— Tion mi ne povas, — diris Gimlio. — Sed mi ĝojas, ke la ombro ne

pli proksimiĝis. Ĝi tute ne plaĉis al mi. Tro multe ĝi memorigis min pri la ombro en Morio — la ombro de la balrogo, — li finis flustrante.

— Tio ne estis balrogo, — diris Frodo, ankoraŭ tremante pro la frostiĝo kiu kroĉiĝis al li. — Tio estis io pli malvarma. Mi opinias, ke ĝi estis... — Poste li paŭzis kaj silentiĝis.

— Kion vi opinias? — demandis Boromiro scivole, kliniĝante el sia boato kvazaŭ provante ekvidi la vizaĝon de Frodo.

— Mi opinias... Ne, mi ne volas diri, — respondis Frodo. — Kio ajn ĝi estis, ĝia falo senkuraĝigis niajn malamikojn.

— Tiel ŝajnas, — diris Aragorno. — Tamen kie kaj kiom ili estas, kaj kion ili faros poste, tion ni ne scias. Ĉi-nokte ni ĉiuj devas esti sendormaj! Kaŝas nin nun la mallumo. Sed kion rivelos la tago, kiu povas diri? Havu viajn armilojn en manproksimo!

Sam sidis frapetante la tenilon de sia glavo, kvazaŭ li kalkulus per la fingroj, kaj rigardis al la ĉielo.

— Estas tre strange, — li murmuris. — La luno samas en la Provinco kaj en Sovaĝujo, aŭ tiel devus esti. Sed aŭ ĝi misfunkcias, aŭ mia kalkulado eraras. Vi certe memoras, s-ro Frodo, ke la luno malkreskis dum ni kuŝis sur la *fleto* supre sur tiu arbo: unu semajnon de la plenluno, mi opinias. Kaj ni jam vojaĝis unu semajnon survoje je la pasinta nokto, kiam ekaperas nova luno maldika kiel ungotondaĵo, kvazaŭ ni restus neniom da tempo en la elfa lando.

» Nu, mi certe memoras tri noktojn tie, kaj ŝajnas, ke mi meraoras plurajn pliajn, sed mi volonte ĵurus, ke neniel temis pri tuta monato. Oni vere supozus, ke tie la tempo ne pasis!

— Kaj eble estis tiel, — diris Frodo. — En tiu lando, eble, ni estis en tempo, kiu aliloke jam delonge forpasis. Mi opinias, ke nur kiam Arĝentvejno reportis nin al Anduino, ni revenis al la tempo, kiu trafluas mortemulajn landojn ĝis la Granda Maro. Kaj mi tute ne memoras lunon, ĉu novan ĉu malnovan, en Karas Galadono: nur stelojn nokte kaj sunon tage.

Legolaso ekmoviĝis en sia boato.

— Fakte, tempo neniam ripozas, — li diris, — sed ŝanĝiĝo kaj kreskado ne samas en ĉiuj aĵoj kaj ĉiuj lokoj. Por la elfoj la mondo moviĝas, kaj ĝi moviĝas jen tre rapide, kaj jen tre malrapide. Rapide, ĉar ili mem malmulte ŝanĝiĝas, kaj ĉio cetera preterrapidas; tio malĝojigas ilin. Malrapide, ĉar ili ne kalkulas la kurantajn jarojn, ne por si mem. La pasantaj sezonoj estas nuraj ondetoj ĉiam ripetataj en la longa longa fluo. Tamen sub la suno ĉio devas eluziĝi en la fino.

— Sed la eluziĝo malrapidas en Lorieno, — diris Frodo. — Sur ĝi estas la potenco de la Damo. Riĉaj estas la horoj, kvankam ili ŝajnas mallongaj,

en Karas Galadono, kie Galadriela posedas la Elfan Ringon.

— Tio devas ne esti dirita ekster Lorieno, eĉ ne al mi, — diris Aragorno. — Ne plu parolu pri ĝi! Sed estas ja tiel, Sam: en tiu lando vi maltrafis vian kalkulon. Tie la tempo rapide preterfluis nin, samkiel la elfojn. La malnova luno pasis, kaj nova luno kreskis kaj malkreskis en la ekstera mondo, dum ni restadis tie. Kaj hieraŭ vespere nova luno revenis. La vintro preskaŭ forpasis. La tempo fluas antaŭen al printempo de malmulta espero.

Silente pasis la nokto. Neniu voĉo aŭ voko aŭdiĝis trans la akvo. La vojaĝantoj kaŭrantaj en siaj boatoj sentis ŝanĝiĝon de l' vetero. La aero iĝis varma kaj tre malmova sub la malseketaj nubegoj, kiuj jam alflosis el la sudo kaj la foraj maroj. La fluado de l' Rivero trans la rokojn de l' rapidejoj ŝajnis ĉiam plilaŭtiĝi kaj proksimiĝi. La branĉetoj de l' arboj superili ekgutadis.

Kiam tagiĝis, la humoro de l' ĉirkaŭa mondo estis moliĝinta kaj tristiĝinta. Malrapide la aŭroro iĝis pala lumo, difuzita kaj senombra. Sur la Rivero estis nebuleto, kaj blanka nebulo vestis la bordon; la kontraŭa bordo ne estis videbla.

— Mi ne toleras nebulon, — diris Sam, — sed tiu ĉi ŝajnas bonŝanca. Nun ni eble povos ekiri nerimarkite de tiuj malbenitaj goblenoj.

— Povas esti, — diris Aragorno. — Sed estos malfacile trovi la padon se la nebulo ne maldensiĝos iom, poste. Kaj ni devos trovi la padon, se ni volas pasi Sarn Gebiron kaj alveni al Emin Muilo.

— Mi ne vidas kialon por pasi la Rapidejojn aŭ sekvi la Riveron ankoraŭ pluen, — diris Boromiro. — Se Emin Muilo kuŝas antaŭ ni, ni do povas forlasi tiujn ĉi boatetojn, kaj ekiri okcidenten kaj suden, ĝis ni alvenos Entvaŝon kaj transiros al mia propra lando.

— Tion ni povas, se ni celas al Minaso Tirit, — diris Aragorno, — sed tio ankoraŭ ne estas konsentita. Kaj tia direktiĝo eble estos pli danĝera ol ĝi ŝajnas. La valo de Entvaŝo estas plata kaj marĉa, kaj nebulo estas mortiga faktoro por piedirantoj kaj ŝarĝitoj. Mi ne volas forlasi niajn boatojn ĝis tio necesos. La Rivero almenaŭ estas pado nemaltrafebla.

— Sed la Malamiko posedas la orientan bordon, — objetis Boromiro, — kaj eĉ se vi pasos la Pordojn de Argonato kaj venos senmalhelpe ĝis Tindroko, kion vi poste faros? Ĉu subensalti laŭ la Falegoj kaj alteriĝi en marĉoj?

— Ne! — respondis Aragorno. — Prefere diru, ke ni portos niajn boatojn laŭ la antikva vojo ĝis Raŭros-subo, kaj tie surakviĝos denove. Ĉu vi ne konas, Boromiro, aŭ ĉu vi preferas forgesi la Nordan Ŝtuparon, kaj la altan seĝon sur Amono Hen, kiuj estis faritaj dum epoko de l' grandaj reĝoj? Minimume mi emas stari sur tiu alta loko denove, antaŭ ol decidi pri

mia plua direktiĝo. Tie, eble, ni vidos iun signon, kiu gvidos nin.

Boromiro longe rezistis tiun elekton; sed kiam evidentiĝis, ke Frodo sekvos Aragornon, kien ajn li iros, li cedis.

— Ne estas kutimo de la homoj de Minaso Tirit forlasi siajn amikojn okaze de ties bezono, — li diris, — kaj mian forton vi bezonos, se vi volas iam atingi Tindrokon. Ĝis la alta insulo mi iros, sed ne pluen. Tie mi turnos min al mia hejmo, sola se mia helpo ne meritos la rekompencon de ies kunirado.

La tago jam fortiĝis, kaj la nebulo iom maldensiĝis. Estis decidite, ke Aragorno kaj Legolaso tuj antaŭeniru sur la bordo, dum la aliaj restos kun la boatoj. Aragorno esperis trovi iun eblecon porti la boatojn kaj la pakaĵojn al la pli kvieta akvo post la Rapidejoj.

— Boatoj de l' elfoj eble ne submergiĝus, — li diris, — sed tio ne garantias, ke ni trapasos Sarn Gebiron vivantaj. Neniu ĝis nun tion faris. Neniun vojon faris la homoj de Gondoro en tiu ĉi regiono, ĉar eĉ dum iliaj glortagoj ilia regno ne alvenis laŭ Anduino post Emin Muilo; sed ie troviĝas transportejo sur la okcidenta bordo, eble mi sukcesos trovi ĝin. Ne eblas, ke ĝi jam pereis, ĉar malpezaj boatoj kutimis vojaĝi el Sovaĝejo ĝis Osgiliado, kaj tion ankoraŭ faris ĝis antaŭ kelkaj jaroj, kiam plimultiĝis la orkoj de Mordoro.

— Malofte dum mia vivo venis iu boato el la nordo, kaj la orkoj spionvagas sur la orienta bordo, — diris Boromiro. — Se vi iros antaŭen, danĝero kreskos ĉiumejle, eĉ se vi trovos padon.

— Danĝero kuŝas antaŭe sur ĉiu vojo suden, — respondis Aragorno. — Atendu nin dum unu tago. Se ni ne revenos dum tiu periodo, vi scios, ke miso ja okazis al ni. Tiam vi devos elekti novan estron kaj sekvi lin laŭeble.

Kun la koro peza Frodo vidis Aragornon kaj Legolason grimpi la apikan bordon kaj malaperi en la nebuleton; sed liaj timoj pruviĝis senbazaj. Pasis nur du-tri horoj, kaj apenaŭ tagmezis, kiam reaperis la ombrecaj figuroj de l' esplorintoj.

— Ĉio en ordo, — diris Aragorno, subengrimpante la bordon. — Ekzistas vojeto, kaj ĝi kondukas ĝis taŭga albordiĝejo, kiu ankoraŭ uzeblas. La distanco ne estas granda: la komenciĝo de l' Rapidejoj troviĝas je nura duonmejlo laŭ la fluo, kaj ili daŭras malpli ol unu mejlon. Ne malproksime post ili la fluo iĝas denove klara kaj glata, kvankam rapida. Plej malfacile por ni estos transporti niajn boatojn kaj pakaĵojn ĝis la malnova portovojo. Ni ĝin trovis, sed ĝi kuŝas sufiĉe malproksime de ĉi tiu bordo, kaj pasas sub ŝirmo de rokomuro, je mejl-okono aŭ pli de la strando. Ni ne malkaŝis, kie kuŝas la norda alteriĝo. Se ĝi plu ekzistas, ni verŝajne pasis ĝin hieraŭ nokte. Eĉ se ni strebus granddistance kontraŭ la fluo, ni

tamen eble maltrafus ĝin pro la nebulo. Mi bedaŭras, ke ni devos jam forlasi la Riveron kaj celi la portovojon laŭpove de ĉi tie.

— Tio ne estus facila, eĉ se ni ĉiuj estus homoj, — diris Boromiro.

— Tamen ni provos tion, kiaj ni estas, — diris Aragorno.

— Ja vere, — diris Gimlio. — La kruroj de l' homoj hezitemas sur malfacila vojo, dum gnomo pluiras, eĉ se la ŝarĝo pezas duoble lian propran pezon, Mastro Boromiro!

La tasko pruviĝis vere malfacila, tamen finfine ĝi plenumiĝis. La varoj estis elprenitaj el la boatoj kaj portitaj ĝis la supro de l' bordo, kie troviĝis ebenejo. Poste la boatoj estis elakvigitaj kaj portitaj supren. Ili estis multe malpli pezaj ol ili atendis. El kiu arbo, kreskinta en la elfa lando, ili konstruiĝis, eĉ Legolaso ne sciis; sed la ligno estis fortika kaj tamen strange malpeza. Gaja kaj Grinĉjo senhelpe povis facile porti sian boaton tra la ebenejo. Tamen necesis forto de l' du homoj por levi kaj treni ilin tra la tereno, kiun la Kunularo jam devis transiri. Tiu deklivis for de l' Rivero, konfuza dezerto el grizaj kalkŝtonegoj, kun multaj kaŝitaj truoj kovritaj de loloj kaj arbustoj; troviĝis densejoj el rubusoj kaj apikaj valetoj, kaj ie-tie marĉaj flakoj plenigitaj de akvo gutinta el terasoj pli enlande.

Unu post alia Boromiro kaj Aragorno portis la boatojn, dum la aliaj penis kaj stumblis post ili kun la pakaĵoj. Finfine ĉio estis transmovita kaj elmetita sur la portovojon. Poste malmulte plu malhelpataj, krom de diskuŝantaj dornarbustoj kaj multaj falintaj ŝtonoj, ili moviĝis antaŭen ĉiuj kune. Nebulo ankoraŭ pendis disvuale sur la eriĝanta rokomuro, kaj maldekstre kovris la Riveron nebuleto: ili povis aŭdi la akvon impulsanta kaj ŝaŭmanta sur la akraj bretoj kaj ŝtonaj dentoj de Sarn Gebiro, sed ili ne povis vidi ĝin. Ili dufoje plenumis la vojaĝon, antaŭ ol ĉio estis sekure portita ĝis la suda alteriĝo.

Tie la portovojo, returniĝante al la akvobordo, deklivis malabrupte ĝis la malprofunda rando de lageto. Tiu ŝajnis ĉerpita el la riverflanko, ne permane, sed per la akvo, kiu kirliĝis suben de Sarn Gebiro kontraŭ malaltan elstaraĵon da roko, kiu etendiĝis iomete en la fluon. Post ĝi la bordo deklivis apike al griza klifo, kaj troviĝis malmulte pli da pasvojo por piedirantoj.

Jam pasis la mallonga posttagmezo, kaj malhela nubeca krepusko ekĉirkaŭis. Ili sidis apud la akvo, aŭskultante la konfuzitajn kuron kaj bruon de l' Rapidejoj kaŝitaj en la nebuleto; ili estis lacaj kaj dormemaj, kaj iliaj koroj estis tiel malgajaj, kiel la mortanta tago.

— Nu, jen ni estas, kaj ĉi tie ni devos pasigi la nokton, — diris Boromiro. — Ni bezonas dormon, kaj eĉ se Aragorno emus pasi la Pordegon de Argonato dumnokte, ni estas ĉiuj tro lacaj — krom, sendube,

nia fortika gnomo.

Gimlio tute ne respondis: li preskaŭ ekdormis side.

— Ni ripozu nun kiel eble plej multe, — diris Aragorno. — Morgaŭ ni devos denove vojaĝi tage. Krom se la vetero denove ŝanĝiĝos kaj perfidos nin, ni havos bonan eblecon tragliti, nerimarkite de iuj okuloj sur la orienta bordo. Sed hodiaŭ nokte du devos vaĉi kune laŭvice: trihora ripozo kaj unuhora vaĉado.

Nenio okazis tiunokte pli malagrabla ol mallonga pluvetado antaŭ tagiĝo. Tuj kiam plenlumis, ili ekiris. Jam la nebuleto maldensiĝis. Ili iris laŭeble proksime al la okcidenta flanko, kaj ili povis vidi la malklarajn formojn de l' malaltaj klifoj leviĝantaj ĉiam pli alten, ombraj muroj kun piedoj en la rapidanta rivero. Mezmatene la nuboj pli subiĝis, kaj peze ekpluvis. Ili tiris la peltajn kovrilojn sur siajn boatojn por malhelpi inundecon kaj drivis plu; malmulto videblis antaŭ ili aŭ ĉirkaŭ ili tra la griza pluvkurteno.

La pluvo tamen ne longe daŭris. Malrapide la ĉielo super ili heliĝis, kaj poste subite la nuboj diseriĝis, kaj ties taŭzitaj franĝoj fortiriĝis norden laŭ la Rivero. Malaperintaj estis la nebuloj kaj nebuletoj. Antaŭ la vojaĝantoj kuŝis larĝa ravino, kun grandaj rokecaj flankoj al kiuj kroĉiĝis, sur bretoj kaj en mallarĝaj fendetoj, kelkaj obstinaj arboj. La kanalo pli mallarĝiĝis kaj la Rivero pli rapidiĝis. Nun ili rapidis antaŭen kun malmulta espero pri halto aŭ turniĝo, kion ajn ili renkontus antaŭ si. Super ili estis strio da palblua ĉielo, ĉirkaŭ ili la malhela ombrumita Rivero, kaj antaŭ ili nigraj, forkaŝantaj la sunon, montetoj de Emin Muilo, en kiuj vidiĝis neniu malfermejo.

Frodo rigardante antaŭen vidis en foro du rokegojn proksimiĝantajn: ili aspektis kiel du pinakloj aŭ ŝtonpilastroj. Altaj, apikaj kaj minacaj ili staris ambaŭflanke de l' fluo. Mallarĝa aperturo aperis inter ili, kaj la Rivero pelis la boatojn tiudirekten.

— Vidu la Argonaton, la Pilastrojn de l' Reĝoj! — kriis Aragorno. — Ni baldaŭ pasos ilin. Tenu la boatojn en spaliro, kaj laŭeble distaj unu de alia! Restigu vin en mezo de la fluo!

Dum Frodo estis portata al la grandaj pilastroj, ili altiĝis kvazaŭ turoj renkonte al li. Gigantoj ili ŝajnis al li, egaj grizaj figuroj silentaj tamen minacaj. Poste li vidis, ke ili estis efektive formitaj kaj fasonitaj: la lerto kaj potenco antikvaj prilaboris ilin, kaj ankoraŭ ili konservis tra la sunoj kaj pluvoj de forgesitaj jaroj la potencan aspekton laŭ kiu ili estis ĉizitaj. Sur grandaj piedestaloj fundamentitaj en la profundaj akvoj staris du reĝegoj el ŝtono: ankoraŭ kun nebuligitaj okuloj kaj sulkiĝintaj fruntoj ili brovumis al la nordo. La maldekstra manplato de ĉiu estis levita polmantaŭe en gesto

averta: en ĉies dekstra mano estis hakilo; sur ĉies kapo estis eriĝanta kasko kun krono. Grandan potencon kaj majeston ili ankoraŭ vestis, la silentaj gardantoj de regno longe malaperinta. Imponiĝo kaj timo trafis Frodon, kaj li ekkaŭris, fermante la okulojn kaj ne riskante rigardi supren, kiam la boato proksimiĝis. Eĉ Boromiro klinis sian kapon dum la boatoj kirlopasis, feblaj kaj pasemaj kiel folietoj, sub la daŭra ombro de l' sentineloj de Numenoro. Tiel ili pasis en la malluman abismon de la Pordego.

Apikaj baŭmis la teruraj klifoj ĝis altoj nedivenebla j ambaŭflanke. Tre fora estis la malhela ĉielo. La nigraj akvoj muĝis kaj eĥis, kaj vento kriĉis super ili. Frodo kaŭrante super siaj genuoj aŭdis Samon antaŭe murmuranta kaj ĝemanta: "Kia loko! Kia terura loko! Kiam mi jam elboatiĝos, mi neniam denove malsekigos en flako la piedfingrojn, des malpli en rivero!"

— Ne timu! — diris nekonata voĉo malantaŭ li.

Frodo turnis sin kaj vidis Paŝegulon, kaj tamen ne Paŝegulon, ĉar la veterumita disirulo ne plu ĉeestis. En la malantaŭaĵo sidis Aragorno, filo de Aratorno, fiera kaj rekta, gvidante la boaton per lertaj padelpuŝoj; lia kapuĉo estis repuŝita, kaj liaj malhelaj haroj blovis en la vento, lumo estis en liaj okuloj: reĝo revenanta el ekzilo al sia propra lando.

— Ne timu! — li diris. — Longe mi volis rigardi la similecojn de Isilduro kaj Anariono, miaj prapatroj. Sub ilia ombro Elesaro, la Elfŝtona, filo de Aratorno de l' Domo de Valandilo, filo de Isilduro, heredinto de Elendilo, ne konas timindaĵon!

Poste velkis la lumo en liaj okuloj, kaj li parolis al si:

— Se nur Gandalfo ĉeestus! Kiom mia koro sopiras al Minaso Anor kaj al muroj de mia propra urbego! Sed kien nun mi iros?

La abismo estis longa, malluma kaj plenigita je bruo de vento, rapida akvo kaj eĥantaj ŝtonoj. Ĝi kliniĝis iom okcidenten tiel ke komence ĉio antaŭe estis malluma; sed baldaŭ Frodo vidis antaŭ si altan aperturon de lumo, ĉiam pligrandiĝantan. Ĝi rapide proksimiĝis, kaj subite la boatoj trapafiĝis eksteren en larĝan klaran lumon.

La suno, jam delonge falinta el la zenito, brilis en ventplena ĉielo. La retenitaj akvoj disetendiĝis en longan ovalan lagon, palan Nen Hithoelon, ĉirkaŭatan de apikaj grizaj montetoj, kies flankojn vestis arboj, sed iliaj vertoj estis nudaj, fride brilantaj en la sunlumo. Ĉe la malproksima suda finaĵo altiĝis tri montopintoj. La meza staris iom antaŭe de l' aliaj kaj disigite de ili, insulo en la akvo, ĉirkaŭ kiu la fluanta Rivero ĵetis palajn muarajn brakojn. De fore sed profunda laŭ la vento alvenis sono muĝa, kvazaŭ tamburado de tondro aŭdita de malproksime.

— Jen Tol Brandiro! — diris Aragorno, fingromontrante suden al la alta pinto. — Maldekstre staras Amono Laŭ, kaj dekstre estas Amono Hen, la

Montoj de Aŭdo kaj de Vido. Dum la epoko de la grandaj reĝoj sur ili estis altaj seĝoj, kaj de tie oni vaĉis. Sed laŭdire neniu piedo de homo aŭ besto iam ajn paŝis sur Tol Brandiro. Antaŭ ol venos la noktombro ni alvenos ilin. Mi aŭdas voki la senĉesan voĉon de Raŭroso.

La Kunularo nun iom ripozis, drivante suden laŭ ŝanelo, kiu trafluis la mezon de la lago. Ili iom manĝis, kaj poste prenis siajn remilojn kaj rapidis survoje. La flankoj de l' okcidentaj montetoj enombriĝis, kaj la suno iĝis ronda kaj ruĝa. Ie-tie elgvatis nebuleca stelo. La tri pintoj baŭmis antaŭ ili, malheliĝante en la krepusko. Raŭroso muĝis grandvoĉe. Jam nokto kuŝis sur la fluantaj akvoj, kiam la vojaĝantoj finfine alvenis sub la ombron de l' montetoj.

Finiĝis la deka tago de ilia vojaĝo. Dezertejo estis malantaŭ ili. Ili ne povis pluiri sen elekto inter la orienta kaj okcidenta vojoj. Ilin frontis la lasta etapo de la Serĉo.

10

La disrompo de l’ Kunularo

Aragorno kondukis ilin al la dekstra brako de l’ Rivero. Tie sur la okcidenta flanko sub ombro de Tol Brandiro verda herbejo etendiĝis al la akvo de l’ subo de Amono Hen. Apude leviĝis la unuaj malabruptaj deklivoj de l’ monteto arbvestita, kaj arboj etendiĝis okcidenten laŭ la kurbaj bordoj de la lago. Fonteto saltfalis suben kaj nutris la herbon.

— Ĉi tie ni restos hodiaŭ nokte, — diris Aragorno. — Tio ĉi estas la herbejo de Part Galeno: bela loko dum la somertagoj de antaŭlonge. Ni esperu, ke miseco ankoraŭ ne alvenis ĉi tien.

Ili trenis siajn boatojn sur la verdajn bordojn, kaj apude ili starigis sian bivakon. Ili starigis vaĉon, sed nek vidis nek aŭdis siajn malamikojn. Se Golumo sukcesis sekvi ilin, li restis nevidata kaj neaŭdata. Malgraŭ tio, dum la nokto pasis, Aragorno maltrankviliĝis, moviĝante ofte dumdorme kaj vekiĝante. En la noktoprofundo li stariĝis kaj venis al Frodo, kies vico estis por vaĉi.

— Kial vi maldormas? — demandis Frodo. — Ne temas pri via vaĉo.

— Mi ne scias, — respondis Aragorno; — sed ombro kaj minaco kreskis, dum mi dormis. Estus bone, se vi elingigus vian glavon.

— Kial? — diris Frodo. — Ĉu malamikoj alestas?

— Ni vidu, kion montros Piko, — respondis Aragorno.

Frodo elingigis la elfan klingon. Konsternante lin la eĝoj malhele ekbrilis en la mallumo.

— Orkoj! — li diris. — Ne tre proksimaj, kaj tamen tro proksimaj verŝajne.

— Tion mi ja timis, — diris Aragorno. — Sed eble ili ne estas ĉi-borde de l’ Rivero. La brilo de Piko estas malforta, kaj eble indikas nenion pli ol spionojn el Mordoro vagantajn sur la deklivoj de Amono Laŭ. Mi neniam antaŭe aŭdis pri orkoj sur Amono Hen. Tamen kiu scias, kio povas okazi dum tiuj ĉi misaj tagoj, ĉar Minaso Tirit jam ne sekurigas la pasejojn de Anduino. Ni devos iri singarde.

La tago venis kvazaŭ fajro kaj fumo. Malalte en la oriento troviĝis nigraj nubostangoj kvazaŭ fumoj de granda incendio. La leviĝanta suno lumigis ilin de sube per flamoj malpure ruĝaj; sed baldaŭ ĝi grimpis super ilin en klaran ĉielon. La pinto de Tol Brandiro estis kronita de oro. Frodo rigardis

orienten kaj rigardis la altan insulon. Ties flankoj eksplodis apike el la kuranta akvo. Tre alte super la altaj klifoj estis abruptaj deklivoj, sur kiuj grimpis arboj, imbrikante unu sur alian; kaj eĉ pli supre estis grizaj facoj de neatingebla roko, kronitaj per granda sagturo ŝtona. Multaj birdoj ĉirkaŭflugis ĝin, sed neniu alia indiko pri vivantaĵoj estis videbla.

Kiam ili finmanĝis, Aragorno kunvokis la Kunularon.

— Finfine alvenis la tago, — li diris: — la elektotago, kiun ni longe prokrastis. Kio nun fariĝos el nia Kunularo, kiu vojaĝis tiom distance en frateco? Ĉu ni turnu nin okcidenten kun Boromiro kaj aliru la militojn de Gondoro, aŭ turniĝu orienten al la Timo kaj Ombro, aŭ ĉu ni disrompu nian kunulecon kaj iru tien kaj alien laŭ nia unuopa elekto? Kion ajn ni faros, tio estas farenda baldaŭ. Ni ne povas longe ĉi tie halti. La malamikoj estas sur la orienta bordo, tion ni scias; sed mi timas, ke la orkoj eble estas jam ĉi-flanke.

Sekvis longa silento, dum kiu neniu parolis aŭ moviĝis.

— Nu, Frodo, — diris Aragorno finfine. — Mi timas, ke la ŝarĝo pezas sur vin. Vi estas la Portanto nomita de la Konsilio. Vian propran vojon nur vi povas elekti. Pri tiu ĉi afero mi ne povas konsili vin. Mi ne estas Gandalfo, kaj kvankam mi klopodis ludi lian rolon, mi ne scias, kiun intencon aŭ esperon li havis pri tiu ĉi horo, se entute li iun havis. Plej probable ŝajnas, ke se li nun ĉeestus la elekto tamen restus ĉe vi. Tia estas via sorto.

Frodo ne tuj respondis. Poste li parolis malrapide.

— Mi scias, ke necesas hasto, tamen mi ne povas elekti. La ŝarĝo estas peza. Havigu al mi unu horon, kaj poste ni parolos. Lasu min sola!

Aragorno rigardis lin bonkore-kompateme.

— Do bone, Frodo, filo de Drogo, — li diris. — Vi havos unu horon, kaj vi estos sola. Ni provizore restos ĉi tie. Sed ne vagu malproksimen aŭ ekster vokeblecon.

Frodo sidis momente kun la klinita kapo. Sam, kiu estis rigardinta sian mastron tre zorgeme, skuis sian kapon kaj murmuris: “Eminente evidente estas, sed ne utilas, ke Sam Vato enŝovu sian nazon nuntempe”.

Baldaŭ Frodo stariĝis kaj formarŝis, kaj Sam konstatis, ke dum la aliaj bridis sin kaj ne postrigardis lin, la okuloj de Boromiro spuris Frodon atente, ĝis li elvidiĝis inter la arboj sube de Amono Hen.

Vagante komence sencele en la arbaro, Frodo trovis, ke liaj piedoj gvidas lin supren al la montodeklivoj. Li alvenis padon, ŝrumpantan ruinaĵon de vojo antaŭlonga. Ĉe apikaj lokoj, ŝtupoj el ŝtono estis ĉizitaj, sed nun tiuj estis fenditaj, trivitaj kaj splititaj per arboradikoj. Dum kelka tempo li grimpis, ne ĝenante sin pri la direkto, ĝis li alvenis herban lokon.

Aŭkuparoj kreskis ĉirkaŭ ĝi, kaj meze troviĝis larĝa plata ŝtono. La eta alteja herbejo estis aperta al la oriento kaj nun ĝin plenigis la frua sunlumo. Frodo haltis kaj elrigardis trans la Riveron sube malproksime, al Tol Brandiro kaj la birdoj rondflugantaj en la granda aerabismo inter li kaj la senpaŝa insulo. La voĉo de Raŭroso estis potenca muĝado miksita kun profunda pulsanta sonoro.

Li sidiĝis sur la ŝtonoj kaj apogis sian mentonon per la manoj, fiksrigardante orienten sed vidante malmulton per siaj okuloj. Trapasis lian menson ĉio okazinta, de kiam Bilbo forlasis la Provincon, kaj li revokis kaj pripensis ĉion, kion li povis memori pri la vortoj de Gandalfo. La tempo pasis, kaj ankoraŭ li ne pli proksimis al la elekto.

Subite li vekiĝis el la medito: stranga sento venis al li, ke malantaŭ li estas io, ke neamikaj okuloj rigardas lin. Li saltleviĝe turniĝis; sed surprizite li vidis nur Boromiron, kaj ties vizaĝo estis ridetanta kaj bonvolema.

— Mi timis pri vi, Frodo, — li diris, antaŭeniĝante. — Se Aragorno pravas kaj orkoj estas proksimaj, tiam neniu el ni devus vagi sola, kaj malpleje vi: tiom multe dependas de vi. Kaj ankaŭ mia koro estas peza. Ĉu mi rajtas jam resti kaj iom interparoli, pro tio, ke mi trovis vin? Tio konsolus min. Kiam ĉeestas tiom multaj, ĉiu interparolo fariĝas debato senfina. Sed du kune eble trovos saĝon.

— Vi estas bonkora, — respondis Frodo. — Sed al mi ŝajnas, ke neniu parolado helpos min. Ĉar mi scias, kion mi devus fari, sed mi timas fari ĝin, Boromiro: mi timas.

Boromiro sidis silenta. Raŭroso senfine plu muĝadis. La vento murmuris inter la branĉoj de l' arboj. Frodo tremetis. Subite Boromiro alvenis kaj sidiĝis apude.

— Ĉu vi certas, ke vi ne suferas nenecese? — li diris. — Mi volas helpi vin. Vi bezonas konsilon pri via malfacila elekto. Ĉu vi ne akceptu la mian?

— Mi opinias, ke mi jam scias, kian konsilon vi proponus, Boromiro. Kaj tio ŝajnus saĝa, se ne avertus min mia koro.

— Avertus? Avertus kontraŭ kio? — abrupte diris Boromiro.

— Kontraŭ prokrasto. Kontraŭ la vojo, kiu ŝajnas pli facila. Kontraŭ rifuzo de la ŝarĝo surdorsigita al mi. Kontraŭ... nu, se necesas tion diri, kontraŭ fido al la forto kaj veremo de la homoj.

— Tamen tiu forto jam longe protektis vin malproksime en via landeto, kvankam tion vi ne sciis.

— Mi ne dubas pri la kuraĝo de via popolo. Sed la mondo ŝanĝiĝas. La muroj de Minaso Tirit eble fortikas, sed ili ne fortikas sufiĉe. Se ili malsukcesos, kio poste?

— Ni mortos batalinte kuraĝe. Tamen restas ankoraŭ espero, ke ili ne

malsukcesos.

— Neniu espero dum la Ringo ekzistas, — diris Frodo.

— Ha! La Ringo! — diris Boromiro kun ekbrilantaj okuloj. — La Ringo! Ĉu ne estas stranga sorto, ke ni suferu tiom da timo kaj dubo pro objekto tiel malgranda? Objekto tiel malgranda! Kaj mi vidis ĝin nur momente en la Domo de Elrondo. Ĉu mi ne povas ekvidi ĝin denove?

Frodo levis la okulojn. Lia koro frostiĝis. Li ekvidis la strangan eklumon en la okuloj de Boromiro, tamen ties esprimo estis ankoraŭ afabla kaj amikeca.

— Prefere ĝi kuŝu kaŝite, — li respondis.

— Laŭ via plaĉo. Al mi ne gravas, — diris Boromiro. — Tamen ĉu mi ne rajtas eĉ paroli pri ĝi? Ĉar vi ŝajnas pensi ĉiam nur pri ĝia potenco en la manoj de l' Malamiko: pri ĝiaj misaj uzebloj, ne pri la virtaj. La mondo ŝanĝiĝas, vi diras. Minaso Tirit falos, se la Ringo travivos. Sed kial? Certe, se la Ringo estus ĉe la Malamiko. Sed kial, se ĝi estus ĉe ni?

— Ĉu vi ne ĉeestis la Konsiliĝon? — respondis Frodo. — ĉar ni ne povas uzi ĝin, kaj kio estas farata per ĝi iĝas misa.

Boromiro stariĝis kaj marŝis senpacience tien-reen.

— Tiel vi persistas, — li kriis. — Gandalfo, Elrondo — ĉiuj ĉi personoj instruis vin paroli tiel. Pri si mem ili eble pravas. Tiuj elfoj, duonelfoj kaj sorĉistoj, ili eble trafus en malbonon. Tamen ofte mi demandas min, ĉu ili estas saĝaj aŭ nur timemaj. Tamen ĉiu laŭ sia speco. Fidelkoraj homoj ne estas koruptitaj. Ni el Minaso Tirit lojalis dum longaj provaj jaroj. Ni ne deziras la potencon de sorĉomastroj, nur forton por nin defendi, forton en afero justa. Kaj jen! dum nia bezono la hazardo malkovras la Ringon de Potenco. Ĝi estas donaco, mi diras, donaco al la malamikoj de Mordoro. Estas freneze ne uzi ĝin, uzi la potencon de l' Malamiko kontraŭ lin. La sentimaj, la senkompataj, nur tiuj akiros la venkon. Kion ne povus fari batalanto en tiu ĉi horo, granda estro? Kion ne povus fari Aragorno? Aŭ se li rifuzus, kial ne Boromiro? La Ringo havigus al mi potencon de Komando. Kiel mi pelus la armeojn de Mordoro, kaj ĉiuj homoj venus amase al mia standardo!

Boromiro paŝis tien-reen, parolante ĉiam pli laŭte. Li ŝajnis preskaŭ forgesi pri Frodo, dum lia parolo koncernis murojn kaj armilojn, kaj la kunvokadon de homoj; kaj li starigis planojn pri grandaj aliancoj kaj gloraj estontaj venkoj; kaj li detruis Mordoron, kaj mem iĝis potenca reĝo, bonvolema kaj saĝa. Subite li haltis kaj gestis per siaj brakoj.

— Kaj oni diras, ke ni forĵetu ĝin! — li kriis. — Mi ne diras *detruu* ĝin. Tio eble estus bona, se la racio montrus ian esperon tion plenumi. Tion ĝi ne faras. La sola plano proponata al ni estas, ke duonulo marŝu blinde en

Mordoron kaj proponu al la Malamiko ĉiun eblecon rehavi ĝin por si. Malsaĝaĵo!

» Ĉu vi ne konstatas tion, amiko mia? — li diris, jen subite turnante sin denove al Frodo. — Vi diras, ke vi timas. Se estas tiel, la plej kuraĝa pardonus vin. Sed ĉu ne vere reagas via bona sagaco?

— Ne, mi timas, — diris Frodo. — Simple timas. Sed mi ĝojas, ke mi aŭdis vin paroli tiel detale. Mia menso estas jam pli klara.

— Do vi venos al Minaso Tirit? — kriis Boromiro. Liaj okuloj ekbrilis kaj lia mieno iĝis entuziasma.

— Vi miskomprenas min, — diris Frodo.

— Sed vi venos, almenaŭ por kelka tempo? — Boromiro persistis. — Mia urbo jam ne estas malproksima; kaj ĝis Mordoro estas malmulte pli longa vojo ol de ĉi tie. Ni estas jam longe en la sovaĝejo, kaj vi bezonas sciigojn pri la agoj de la Malamiko antaŭ ol vi elpaŝos. Venu kun mi, Frodo. Vi bezonas ripozon antaŭ via aventuro, se iri vi insistas. — Li metis manon sur la ŝultron de l' hobito laŭ amika maniero; sed Frodo sentis, ke la mano tremas pro subpremata ekscito. Li haste forpaŝis, kaj rigardis alarmite la altan viron, preskaŭ duoble pli altan ol li kaj multoble superan al li je forto.

» Kial vi tiom neamikas? — diris Boromiro. — Mi estas homo lojala, nek ŝtelisto nek spiono. Mi bezonas vian Ringon: tion vi nun scias, sed mi ĵuras al vi, ke mi ne deziras reteni ĝin. Ĉu vi ne volos almenaŭ permesi, ke mi provu mian planon? Pruntedonu al mi la Ringon!

— Ne! ne! — kriis Frodo. — La Konsilio komisiis al mi ĝian portadon.

— Pro via propra stulteco la Malamiko venkos nin, — kriis Boromiro. — Kiel tio kolerigas min! Stultulo! Obstina stultulo! Kuranta volonte al morto kaj ruiniganta nian aferon. Se iuj mortemuloj rajtas pretendi la Ringon, tiuj estas la homoj de Numenoro, sed ne duonuloj. Ĝi apartenas al vi nur pro malfeliĉa hazardo. Ĝi povis esti la mia. Ĝi devus esti la mia. Donu ĝin al mi!

Frodo ne respondis, sed formoviĝis ĝis la granda plata ŝtono staris inter ili.

— Nu, nu, mia amiko! — diris Boromiro per malpli laŭta voĉo. — Kial vi ne rezignu pri ĝi? Kial ne liberiĝu de viaj duboj kaj timo? Vi povos kulpigi min, se vi volas. Vi povos diri, ke mi estis tro forta kaj perforte prenis ĝin. Ĉar mi estas por vi tro forta, duonulo, — li kriis, kaj subite li transsaltis la ŝtonon kaj saltis kontraŭ Frodon. Lia bela kaj agrabla vizaĝo estis hide ŝanĝita; arda fajro brulis en liaj okuloj.

Frodo saltis flanken kaj denove intermetis la ŝtonon inter ili. Estis nur unu ebla farotaĵo. Li tremante eltiris la Ringon kaj rapide surfingrigis ĝin, ĝuste kiam Boromiro denove alsaltis lin. La viro spasmospiris, rigardis

momente konsternite, kaj poste ĉirkaŭkuris frenezece, serĉante ie kaj tie inter la rokoj kaj arboj.

— Mizera trompulo! — li kriegis. — Kiam mi nur kaptos vin! Jam mi komprenas vian intencon. Vi donos la Ringon al Saŭrono kaj perfidos nin ĉiujn. Vi nur atendis okazon por forlasi nin. Estu malbenataj vi kaj ĉiuj duonuloj je morto kaj mallumo! — Poste, trafinte per piedo ŝtonon, li falis teren kaj kuŝis survizaĝe. Dum kelka tempo li estis senmova kvazaŭ lin trafis la propra malbeno; poste, subite, li ekploris.

Li stariĝis kaj pasigis la manon antaŭ la okuloj, viŝante la larmojn.

— Kion mi diris? — li kriis. — Kion mi faris? Frodo, Frodo! Revenu! La frenezo trafis min, sed ĝi forpasis. Revenu!

Nenia respondo. Frodo eĉ ne aŭdis liajn kriojn. Li estis jam malproksima, saltante blinde laŭ la pado al la montosupro. Teruro kaj malĝojo skuis lin, dum li vidis pense la frenezan atakeman vizaĝon de Boromiro kaj ties brulajn okulojn.

Baldaŭ li alvenis sola sur la pinton de Amono Hen kaj haltis tie spiromanke. Li vidis kvazaŭ tra nebuleto larĝan platan rondon, pavimitan per fortikaj ŝtonoj kaj ĉirkaŭitan de eriĝanta parapeto; kaj meze, starigite sur kvar ĉizitaj pilastroj, estis alta seĝo, atingebla per multobla ŝtuparo. Supren li iris kaj sidiĝis sur la antikva seĝo, sentante sin kiel perditan infanon, kiu surgrimpis la tronon de montaraj reĝoj.

Komence li povis vidi malmulton. Li ŝajnis esti en mondo nebuleta, en kiu estis nur ombroj: la Ringo lin influis. Poste, ie-tie la nebuleto forvelkis kaj li vidis multajn viziojn: etajn kaj klarajn, kvazaŭ ili estus sur tablo sub liaj okuloj, kaj tamen foraj. Mankis sono, vidiĝis nur helaj vivaj bildoj. La mondo ŝajnis ŝrumpinta kaj silentiĝinta. Li sidis sur la Seĝo de Vidado, sur Amono Hen, la Monto de l' Vido de la homoj de Nuraenoro. Oriente li enrigardis larĝajn senmapajn landojn, sennomajn ebenaĵojn, kaj arbarojn neesploritajn. Norden li rigardis, kaj la Granda Rivero kuŝis kvazaŭ rubando sube, kaj la Nebulecaj Montoj staris malgrandaj kaj malmolaj kiel rompitaj dentoj. Okcidenten li rigardis kaj vidis la larĝajn paŝtejojn de Rohano kaj Ortankon, la pinton de Isengardo, kvazaŭ nigran pikilon. Suden li rigardis, kaj ĝuste sub liaj piedoj la Granda Rivero kurbiĝis kvazaŭ falanta ondo kaj plonĝis laŭ la rapidejoj de Raŭroso en ŝaŭmantan puton; briletanta ĉielarko lumis sur la akvofumo. Kaj Etir Anduinon li vidis, la grandan delton de l' Rivero, kaj miriadojn da marbirdoj kirliĝantaj blankpolve en la sunlumo, kaj sub ili verdan kaj arĝentan maron, sulkiĝantan laŭ senfinaj linioj.

Sed ĉie, kien li rigardis, li vidis signojn de milito. La Nebulecaj Montoj estis surkrablataj kvazaŭ formikejoj: orkoj eliradis el mil truoj. Sub la branĉoj de Mornarbaro okazis mortiga interlukto de elfoj kaj homoj kontraŭ

kruelaj bestoj. La lando de l' Beornidoj flamadis; nubo ŝvebis super Morio; fumo leviĝis ĉe la bordoj de Lorieno.

Rajdantoj galopis sur la herbo de Rohano; lupoj elverŝiĝis el Isengardo. El la havenoj de Harado militŝipoj direktiĝis al la maro; kaj el la oriento viroj senĉese moviĝadis: glavistoj, lancistoj, pafarkistoj sur ĉevaloj, ĉaroj de ĉefoj kaj ŝarĝitaj furgonoj. La tuta potenco de l' Malluma Mastro moviĝis. Poste, turninte sin denove suden, li rigardis al Minaso Tirit. Malproksima ĝi ŝajnis kaj bela: blankmura, multtura, fiera kaj belaspekta sur sia montoseĝo; ĝiaj kreneloj brilis ŝtale, kaj ĝiaj turetoj helis je multaj standardoj. Espero eksaltis en lia koro. Sed kontraŭ Minaso Tirit estis starigita alia fortikaĵo, pli granda kaj pli forta. Tien, nevolonte, lia okulo estis trenita. Ĝi pasis la ruinigitajn pontojn de Osgiliado, la rikanantajn pordojn de Minaso Morgul, kaj la Hantatajn Montojn, kaj ĝi rigardis al Gorgoroto, la valo de teruro en la lando Mordoro. Mallumo kuŝis tie sub la suno. Fajro ardis en la fumo. Monto de Sorto estis brulanta, kaj densa fumo leviĝanta. Poste, finfine, lia rigardo fiksiĝis: muro post muro, krenelaro post krenelaro, nigra, senmezure forta, monto el fero, pordo el ŝtalo, turo el adamanto, li vidis ĝin: Baraduron, la Fortikaĵon de Saŭrono. Ĉia espero forlasis lin.

Kaj subite li sentis la Okulon. En la Malhela Turo estis okulo, kiu neniam dormis. Li sciis, ke ĝi konstatis lian rigardon. Troviĝis tie atakema avida volo. Ĝi alsaltis lin, kaj li eksentis ĝin preskaŭ kiel fingron, lin serĉantan. Tre baldaŭ ĝi fiksiĝos al li, scios tute precize, kie li estas. Amonon Laŭ ĝi tuŝis. Ĝi ekrigardis al Tol Brandiro — li sin ĵetis desur la seĝo, kaŭrante, kovrante sian kapon per sia griza kapuĉo.

Li aŭdis sin voki: *Neniam, neniam! Aŭ ĉu estis: Vere mi venas, mi venas al vi*? Tion li ne sciis. Poste kiel flagro el alia potencpunkto venis en lian menson alia penso: *Demetu ĝin! Demetu ĝin! Stultulo, demetu ĝin! Demetu la Ringon*!

La du potencoj interluktis en li. Momente, perfekte ekvilibrigata inter iliaj pikaj pintoj, li tordiĝis, turmentita. Subite li konsciis denove pri si. Frodo, nek la Voĉo nek la Okulo: libera elekti, kaj kun nur unu restanta momento por tion fari. Li defingrigis la Ringon. Li estis surgenua en klara sunlumo antaŭ la alta seĝo. Nigra ombro ŝajnis pasi kiel brako super li; ĝi maltrafis Amonon Hen kaj palpis okcidenten, kaj forvelkis. Poste la tuta ĉielo estis pura kaj blua kaj birdoj kantis sur ĉiuj arboj.

Frodo stariĝis. Li spertis grandan lacon, sed lia volo firmis kaj lia koro plimalpezis. Li parolis voĉe al si.

— Mi jam faros tion, kion mi devas fari. Almenaŭ tio ĉi estas klara: la miso de la Ringo jam agadas eĉ en la Kunularo, kaj la Ringo devos forlasi ĝin antaŭ ol ĝi plenumos pli da miso. Mi iros sola. Iujn mi ne povas fidi, kaj

tiuj, kiujn mi povas fidi, estas tro karaj al mi: kompatinda Samĉjo, Gaja kaj Grinĉjo. Ankaŭ Paŝegulo: lia koro sopiras al Minaso Tirit, kaj li estas bezonata tie, ĉar Boromiro jam falis en mison. Mi iros sola. Tuj.

Li reiris rapide laŭ la vojeto kaj revenis al la herbejo, kie Boromiro trovis lin. Tie li haltis, aŭskultante. Al li ŝajnis, ke li aŭdas kriojn kaj alvokojn el la arbaro apud la bordo sube.

— Ili certe serĉas min, — li diris. — Mi scivolas, kiom longe mi forestis. Horojn, mi supozas. — Li hezitis. — Kion mi povas fari? — li murmuris. — Mi devas iri nun aŭ mi neniam iros. Okazon mi ne plu havos. Malplaĉegas al mi forlasi ilin, jenmaniere sen ia klarigo. Sed verŝajne ili komprenos. Sam komprenos. Kaj kion alian mi povas fari?

Malrapide li elprenis la Ringon kaj surfingrigis ĝin denove. Li malaperis kaj supreniris la monteton, malpli ol siblo de la vento.

La aliaj longe restis apud la rivero. Dum kelka tempo ili estis silentaj, ĉirkaŭmoviĝante sentrankvile; sed nun ili sidis en rondo, kaj ili parolis. De tempo al tempo ili klopodis paroli pri aliaj aferoj, pri sia longa vojaĝo kaj multaj aventuroj; ili pridemandis Aragornon pri Gondoro kaj ties antikva historio, kaj la restaĵoj de ties grandaj laboraĵoj ankoraŭ videblaj en tiu ĉi stranga bordotereno de Emin Muilo: la ŝtonaj reĝoj kaj la seĝoj de Laŭ kaj Hen, kaj la granda Ŝtuparo apud la falejoj de Raŭroso. Sed ĉiam iliaj pensoj kaj vortoj revagis al Frodo kaj la Ringo. Kion Frodo elektos? Kial li hezitas?

— Li pripensas, kiu projekto estas pli senespera, mi opinias, — diris Aragorno. — Kaj tio estas sagaca. Estas jam pli ol iam senespere, ke la Kunularo iru orienten, ĉar ni estas spuritaj de Golumo, kaj devas timi, ke la sekreto pri nia vojaĝo estas jam perfidita. Sed Minaso Tirit estis neniam pli proksima al la Fajro kaj detruo de la Ŝarĝo.

» Ni povas resti ĉi tie dum kelka tempo kaj plenumi kuraĝan kontraŭstaron, sed la Reganto Denetoro kun ĉiuj siaj viroj ne povas esperi pri plenumo de tio, kion eĉ Elrondo konfesis ekster sia kapablo: aŭ teni sekreta la Ŝarĝon, aŭ forteni la plenan potencon de l' Malamiko, kiam tiu venos por ĝin kapti. Kiun vojon elektus iu ajn el ni sur la loko de Frodo? Mi ne scias. Nun pleje ni ja sentas foreston de Gandalfo.

— Doloriga estas nia perdo, — diris Legolaso. — Tamen necesas, ke ni decidiĝu sen lia helpo. Kial ni ne decidu, kaj tiel helpu Frodon? Mi revoku lin kaj poste voĉdonu! Mi voĉdonus por Minaso Tirit.

— Ankaŭ mi, — diris Gimlio. — Ni, kompreneble, estis senditaj nur por helpi la Portanton sur la vojo, ne iri pli malproksimen ol ni volas; kaj neniu el ni estas ĵurinta aŭ ordonita serĉi Monton de Sorto. Malfacila estis nia disiĝo de Lotlorieno. Tamen mi venis ĉi tien, kaj tion ĉi mi diras: nun ni

atingis la lastan elekton, kaj estas al mi klare, ke mi ne kapablas forlasi Frodon. Mi elektus Minason Tirit, sed se tion ne faros li, mi lin sekvos.

— Ankaŭ mi kuniros lin, — diris Legolaso. — Estus malfidele diri adiaŭon.

— Tio ja estus perfido, se ni ĉiuj forlasus lin, — diris Aragorno. — Sed se li iros orienten, tiam ne ĉiuj devos akompani lin; kiel mi ankaŭ ne opinias, ke ĉiuj devus. Tiu aventuro estas hazardega: tiom por ok kiom por du aŭ tri, aŭ unu sola. Se vi permesus al mi elekti, mi nomus tri kunulojn: Sam, kiu ne povus toleri ion alian, Gimlion kaj min mem. Boromiro reiros al sia propra urbo, kie bezonas lin lia patro kaj lia popolo; kaj kun li devus iri la aliaj, aŭ almenaŭ Gajadoko kaj Peregrino, se Legolaso malvolonte forlasos nin.

— Tio tute ne konvenas! — kriis Gaja. — Frodon ni ne povas forlasi! Grinĉjo kaj mi ĉiam intencis iri, kien ajn li irus, kaj tion ni ankoraŭ intencas. Sed ni ne konstatis, kion signifos tio. Ĝi ŝajnis alia, tiom malproksime, en la Provinco aŭ en Rivendelo. Estus freneze kaj kruele permesi, ke Frodo iru al Mordoro. Kial ni ne malhelpu lin?

— Ni devas malhelpi lin, — diris Grinĉjo. — Kaj ĝuste tio zorgigas lin, mi estas certa. Li scias, ke ni ne konsentos, ke li iru orienten. Kaj al la kompatindulo ne plaĉas inviti iun kuniri. Imagu tion: foriri sola al Mordoro! — Grinĉjo tremis. — Sed la kara fola hobiĉjo, li devus scii, ke ne necesas peti. Li devus scii, ke se ni ne povos lin malhelpi, ni ne forlasos lin.

— Pardonpete, — diris Sam. — ŝajnas al mi, ke vi tute ne komprenas mian mastron. Li ne hezitas pri la irota vojo. Kompreneble ne! Kiel valoras Minaso Tirit, ĉiuokaze? Al li, mi volas diri, pardonpete, Mastro Boromiro, — li aldonis, kaj turnis sin. Nur tiam ili rimarkis, ke Boromiro, kiu komence sidis silente rande de la rondo, ne plu estis tie.

— Kien li nun iris? — kriis Sam, mienante zorgon. — Li iom strangis lastatempe, laŭ mia opinio. Sed ĉiuokaze, tiu ĉi afero ne koncernas lin. Li iros hejmen, kiel li ĉiam asertis; kaj ne kulpiginde. Sed s-ro Frodo scias, ke li devos trovi la Fendojn de Sorto, se li povos. Sed li *timas*. Nun, kiam venis la kriza momento, li simple teruriĝis. Jen lia problemo. Kompreneble li iomete lernis, por tiel diri — ni ĉiuj lernis — de kiam ni forlasis la hejmon, aŭ li estus tiom timigita, ke li nur ĵetus la Ringon en la Riveron kaj fuĝus. Sed li ankoraŭ tro timas por komenci. Kaj cetere li ne ĝenas sin pri ni; ĉu ni kuniros aŭ ne. Li scias, ke ni intencas. Ankaŭ tio ĝenas lin. Se li risortigos sin por iri, li volos iri sola. Atentu miajn vortojn! Ni havos problemojn pri li, kiam li revenos. Ĉar li certe risortigos sin, tiel certe, kiel li nomiĝas Baginzo.

— Mi opinias, ke vi parolas pli saĝe ol ĉiuj el ni, Sam, — diris

Aragorno. — Kaj kion ni faru, se vi pruviĝos prava?

— Malhelpu lin! Ne permesu, ke li iru! — kriis Grinĉjo.

— Dubinde, — diris Aragorno. — Li estas la Portanto, kaj la sorto de la Ŝarĝo estas en liaj manoj. Al mi ŝajnas, ke nia rolo ne estas peli lin en iun aŭ alian direkton. Kiel mi ankaŭ ne kredas, ke ni sukcesus, se ni provus. Influas aliaj potencoj multe pli fortaj.

— Nu, mi deziras, ke Frodo "risortigu sin" kaj revenu, por ke ni finfaru la aferon, — diris Grinĉjo. — Tiu ĉi atendado estas malagrablega! Certe la horo pasis?

— Jes, — diris Aragorno. — La horo jam delonge pasis. La mateno fortriviĝas. Ni devas lin voki.

Tiumomente Boromiro reaperis. Li elvenis el inter la arboj kaj marŝis al ili senparole. Lia esprimo estis malgaja kaj trista. Li paŭzis kvazaŭ por nombri la ĉeestantojn, kaj poste sidiĝis aparte, kun la okuloj direktataj teren.

— Kie vi estis, Boromiro? — demandis Aragorno. — Ĉu vi vidis Frodon?

Boromiro hezitis momente.

— Jes kaj ne, — li respondis malrapide. — Jes: mi trovis lin iom supre sur la monteto, kaj mi alparolis lin. Mi urĝis lin veni al Minaso Tirit, sed ne orienten. Mi koleriĝis, kaj li forlasis min. Li malaperis. Mi neniam antaŭe vidis ion similan, kvankam mi aŭdis pri tio en rakontoj. Certe li surfingrigis la Ringon. Mi ne povis lin retrovi. Mi supozis, ke li revenos al vi.

— Ĉu nur tion vi volas rakonti? — diris Aragorno, rigardante severe kaj ne tre bonkore al Boromiro.

— Jes, — li respondis. — Provizore mi diros nenion pli.

— Malbonaĵo! — kriis Sam, saltleviĝe. — Mi ne scias, kion faraĉis tiu ĉi viro. Kial s-ro Frodo surfingrigu la aferon? Li tion ne devis fari; kaj se li ĝin faris, ne estas konjekteble, kio eble okazos!

— Sed li ne daŭrigos tion, — diris Gaja, — eskapinte la vizitinton nebonvenan, kiel tion faris Bilbo.

— Sed kien li iris? Kie li estas? — kriis Grinĉjo. — Li forestas jam longege.

— Kiom da tempo pasis, de kiam vi lastfoje vidis Frodon, Boromiro? — demandis Aragorno.

— Duonhoro, eble, — li respondis. — Aŭ eble unu horo. Mi vagadis iom da tempo poste. Mi ne scias! Mi ne scias! — Li intermanigis sian kapon, kaj sidis kurbiĝinte, kvazaŭ pro malĝojo.

— Unu horo de kiam li malaperis! — kriis Sam. — Ni devas provi tuj trovi lin. Ek!

— Atendu momenton! — kriis Aragorno. — Ni devas iri duope, kaj

aranĝi — hej, atendu! Momenton!

Ne utilis. Ili malatentis lin. Sam la unua forkuris. Gaja kaj Grinĉjo sekvis, kaj jam malaperis okcidenten inter la arbojn apud la bordo, kriante: *Frodo! Frodo*! per siaj klaraj, altaj hobitaj voĉoj. Legolaso kaj Gimlio kuradis. Subita paniko aŭ frenezeco ŝajnis trafinta la Kunularon.

— Ni ĉiuj estos dispelitaj kaj perditaj, — ĝemis Aragorno. — Boromiro! Mi ne scias, kiun rolon vi ludis en tiu ĉi misaĵo, sed helpu nun! Postiru tiujn du junajn hobitojn kaj almenaŭ gardu ilin, eĉ se vi ne sukcesos trovi Frodon. Revenu al tiu ĉi loko, se vi trovos lin, aŭ iajn spurojn de li. Mi baldaŭ revenos.

Aragorno forrapidis sekvante Samon. Ĝuste kiam li alvenis la herbejon inter la aŭkuparoj li atingis lin, penantan supren sur la monteto, anhelantan kaj vokantan, *Frodo*!

— Venu kun mi, Sam! — li diris. — Neniu el ni devas esti sola. Ĉirkaŭas misaĵo. Mi sentas ĝin. Mi iras ĝis la pinto, ĝis la Seĝo de Amono Hen, por vidi, kio estos videbla. Kaj vidu! Okazis, kiel mia koro divenis, Frodo iris ĉi-voje. Sekvu min, kaj tenu la okulojn malfermitaj! — Li rapidis laŭ la vojeto.

Sam faris sian plejeblon, sed li ne povis konkuri kun la disirulo kaj baldaŭ postiĝis. Li ne iris grandan distancon antaŭ ol Aragorno nevidebliĝis antaŭe. Sam haltis kaj anhelis. Subite li frapetis permane sian kapon.

— Haltu, Sam Vato! — li diris voĉe. — Viaj kruroj tro kurtas, do uzu la kapon! Mi pripensu! Boromiro ne mensogas, tio ne estas lia kutimo; sed ne ĉion li sciigis al ni. Io ege timigis s-ron Frodo. Li risortigis sin ĝisprete, subite. Li decidis finfine foriri. Kien? Orienten. Sen Sam? Jes, eĉ sen sia Sam. Tio estas malagrablega, kruele malagrablega.

Sam pasigis manon antaŭ la okuloj, forvišante la larmojn.

— Firmiĝu, Vato! — li diris. — Pensu, se vi kapablas! Li ne povas transflugi riverojn, kaj li ne povas transsalti akvofalojn. Li malhavas ekipon. Do li devas reatingi la boatojn. Reatingi la boatojn! Reen al la boatoj, Sam, fulme!

Sam turnis sin kaj rekuregis laŭ la vojeto. Li falis kaj vundis siajn genuojn. Li stariĝis kaj plukuris. Li alvenis la randon de l' herbejo Part Galeno apud la bordo, kie la boatoj estis trenitaj teren el la akvo. Sed neniu ĉeestis. Ŝajnis aŭdiĝi krioj en la arbaro malantaŭe, sed tiujn li ne atentis. Li staris momenton rigardante, tute senmova, gapante. Boato estis glitanta tute sola desur la bordo. Kun krio Sam kuregis trans la herbejon. La boato glisis en la akvon.

— Venas, s-ro Frodo! Venas! — kriis Sam, kaj ĵetis sin de sur la bordo kroĉeme al la foriranta boato. Li maltrafis ĝin je unu paŝo. Kun krio kaj

plaŭdo li falis vizaĝantaŭe en profundan rapidan akvon. Gargarante li subiĝis, kaj la Rivero fermiĝis super lia bukla verto.

Ekkrio de timo aŭdiĝis el la malplena boato. Remilo kirliĝis kaj la boato turniĝis. Frodo ĝustatempe kaptis la harojn de Sam, kiam tiu supreniĝis bobelante kaj baraktante. Timo elradiis el liaj rondaj brunaj okuloj.

— Supren, Sam, mia knafoo! — diris Frodo. — Nun kaptu mian manon!

— Savu min, s-ro Frodo! — spiregis Sam. — Mi dronis. Vian manon mi ne vidas.

— Jen ĝi. Ne pinĉu, knabo! Mi ne rezignos pri vi. Tretu akvon kaj ne baraktu, aŭ vi renversos la boaton. Jen do, ekkaptu la boatrandon, kaj lasu min uzi la remilon!

Per kelkaj puŝoj Frodo revenigis la boaton ĝis la bordo, kaj Sam povis elgrimpaĉi, malseka kiel arvikolo. Frodo demetis la Ringon kaj denove surpaŝis la bordon.

— El ĉiuj ĝenaĉoj vi estas la plej ĝena, Sam! — li diris.

— Ho, s-ro Frodo, tio estas severa! — diris Sam, frostotremante. — Tio estas severa, provo foriri sen mi kaj tiel plu. Se mi ne divenus ĝuste, kie vi nun estus?

— Sekure sur mia vojo.

— Sekure! — diris Sam. — Tute sola, kaj sen mi por vin helpi? Mi ne povus tion toleri, tio mortigus min.

— Mortigus vin veni kun mi, Sam, — diris Frodo, — kaj tion mi ne estus povinta toleri.

— Ne tiel certe, kiel postlasado, — diris Sam.

— Sed mi iras al Mordoro.

— Mi tute bone scias tion, s-ro Frodo. Kompreneble vi tien iras. Kaj mi akompanos vin.

— Hej, Sam, — diris Frodo, — ne malhelpu min! La aliaj revenos baldaŭege. Se ili trovos min, mi devos argumenti kaj klarigi, kaj mi neniam havos kuraĝon aŭ okazon ekiri. Sed mi devas iri tuj. Nur tio eblas.

— Kompreneble nur tio, — respondis Sam. — Sed ne sola. Ankaŭ mi venos, aŭ neniu el ni iros. Mi truigos ĉiujn boatojn se necese.

Frodo efektive ridis. Subita varmo kaj ĝojo tuŝis lian koron.

— Lasu unu! — li diris. — Ni bezonos ĝin. Sed vi ne povos veni tiel, sen ekipo aŭ nutraĵo aŭ io.

— Nur atendu momenton, kaj mi alportos miajn aferojn! — kriis Sam entuziasme. — Ĉio pretas. Mi antaŭvidis, ke ni foriros hodiaŭ. — Li alkuris la bivakon, elfosis sian tornistron el la amaso en kiu Frodo metis ĝin, kiam li eligis el la boato la posedaĵojn de l' kunuloj, ekkaptis kroman lankovrilon kaj kelkajn krompakaĵojn da nutraĵo, kaj rekuris.

— Tiel fuŝiĝas mia tuta plano! — diris Frodo. — Ne valoras provi eskapon de vi. Sed mi ĝojas, Sam. Mi ne povas diri, kiom mi ĝojas. Venu jam! Estas evidente, ke laŭsorte ni devas iri kune. Ni iros, kaj la aliaj trovu vojon sekuran! Paŝegulo prizorgos ilin. Supozeble mi neniam plu revidos ilin.

— Tamen eble jes, s-ro Frodo. Eble jes, — diris Sam.

Do Frodo kaj Sam ekiris al la lasta etapo de l' Serĉo kune. Frodo forpadelis de l' bordo, kaj la Rivero portis ilin rapide laŭ la okcidenta brako kaj preter la brovumantaj klifoj de Tol Brandiro. La muĝo de la grandaj akvofaloj proksimiĝis. Eĉ kun tiom da helpo, kiom Sam povis aldoni, estis penege transpasi la akvofluon ĉe la suda insulofino kaj peli la boaton orienten direkte al la kontraŭa bordo.

Finfine ili albordiĝis denove sur la sudaj deklivoj de Amono Laŭ. Tie ili trovis bordon malabruptan, kaj ili eltrenis la boaton alten super la akvonivelo kaj kaŝis ĝin laŭeble bone post granda ŝtonego. Poste, surŝultriginte siajn ŝarĝojn, ili ekiris, serĉante vojeton, kiu kondukus ilin trans la grizajn montetojn de Emin Muilo, kaj malsupren en la Landon de Ombro.

LA TRIA LIBRO

1. Travadejoj de Iseno
2. Profundaĵo de Helmo

3. Dunharo
4. Osgiliado
5. Minaso Morgui

1

La forpaso de Boromiro

Aragorno rapidis supren laŭ la deklivo. De tempo al tempo li kliniĝis al la tero. Hobitoj paŝas malpeze, kaj iliajn piedsignojn eĉ disirulo ne sekvas facile, sed proksime al la supro la padon transfluis rojeto, kaj sur la malseka tero li vidis tion, kion li serĉis.

— Mi legis la signojn ĝuste, — li diris al si. — Frodo kuris ĝis la deklivosupro. Mi scivolas, kion li tie vidis? Sed li reiris laŭ la sama vojo, kaj denove malsupreniris.

Aragorno hezitis. Li deziris mem iri al la alta sidloko, esperante tie vidi ion, kio konsilus al li pri la perpleksaĵoj, sed la tempo urĝis. Subite li saltis antaŭen kaj kuris ĝis la verto, laŭ la grandaj pavimslaboj, kaj supren laŭ la ŝtuparo. Poste, sidante sur la alta seĝo li forrigardis. Sed la suno ŝajnis ombriĝinta kaj la mondo malklara kaj fora. Li turniĝis de l' nordo reen ĝis la nordo, kaj vidis nenion krom la malproksimajn montojn, kun escepto de tio, ke tre fore li povis denove vidi en la alto grandan birdon aglosimilan, kiu malrapide descendis laŭ larĝaj cirkloj teren.

Dum li rigardadis, liaj sentemaj oreloj ekaŭdis sonojn en la suba arbaro, sur la okcidenta bordo de l' Rivero. Li rigidiĝis. Aŭdiĝis krioj, kaj inter ili, li terurite rimarkis raŭkajn voĉojn de orkoj. Tiam subite per basvoĉa voko blovis kornego, kaj ties blekoj trafis la montetojn kaj eĥis en la kavoj, laŭtiĝante je kriego pli forta ol la akvofala bruego.

— Jen la korno de Boromiro! — li ekkriis. — Li bezonas helpon! — Li salte malsuprenkuris la ŝtuparon, kuregis laŭ la pado. — Ve! Plagas min hodiaŭ sorto malbona, kaj ĉiu mia faro misas. Kie estas Sam?

Dum lia kuro la krioj laŭtiĝis, sed jam pli mallaŭte kaj senespere blovis la korno. Feroce kaj akrasone leviĝis la krioj de la orkoj, kaj subite la kornovokoj ĉesis. Aragorno trakuris la lastan deklivon, sed antaŭ ol li atingis la montosubon, la sonoj estingiĝis; kaj kiam li sin turnis maldekstren kaj kuris direkte al ili, ili retiriĝis, ĝis fine li ne plu povis aŭdi ilin. Elingiginte sian helan glavon kaj kriante "Elendilo! Elendilo!" li trakrakegis la arbojn.

Je ĉirkaŭ unu mejlo de Part Galeno en maldensejeto li trovis Boromiron. Tiu sidis, apoginte sian dorson per granda arbo, kvazaŭ li ripozus. Sed Aragorno vidis, ke li estas trapikita per multaj nigraplumaj sagoj; lia glavo plu restis en lia mano, sed ĝi estis rompita ĉe la tenilo; lia korno fendita je

duonoj estis apud li. Multaj orkoj kuŝis mortigitaj, amasigitaj ĉirkaŭ li kaj antaŭ liaj piedoj.

Aragorno genuiĝis apud li. Boromiro malfermis siajn okulojn kaj klopodis paroli. Finfine aŭdiĝis lantaj vortoj:

— Mi provis forpreni de Frodo la Ringon. Mi bedaŭras. Mi jam pagis. — Lia rigardo turniĝis al la falintaj malamikoj; minimume dudek kuŝis tie. — Ili estas foririntaj, la duonuloj, la orkoj kaptis ilin. Mi opinias, ke ili ne estas mortintaj. Orkoj ligis ilin. — Li paŭzis kaj liaj okuloj fermiĝis lace. Post momento li ekparolis denove. — Adiaŭ, Aragorno! Iru al Minaso Tirit kaj savu mian popolon! Mi malsukcesis.

— Ne! — diris Aragorno, kaptante lian manon kaj kisante lian frunton. — Vi venkis. Malmultaj plenumis similan venkon. Trankviliĝu! Minaso Tirit nepre ne falos.

Boromiro ridetis.

— Kien ili iris? Ĉu Frodo ĉeestis? — diris Aragorno. Sed Boromiro ne plu parolis.

— Ve! — diris Aragorno. — Tiel forpasis la heredonto de Denetoro, Mastro de l' Turego Garda! Jen fino amara. Nun la Kunularo estas ruinigita. Estas mi la malsukcesinto. Vane Gandalfo fidis min. Kion mi nun faru? Boromiro ŝarĝis min per irado al Minaso Tirit, kaj mia koro tion deziras; sed kie estas la Ringo kaj la Portanto? Kiel mi trovu ilin kaj ŝparu al la Serĉo katastrofon?

Li surgenuis kelkan tempon, kurbiĝinta pro ploroj, ankoraŭ tenante la manon de Boromiro. Tia trovis lin Legolaso kaj Gimlio. Ili venis de la okcidentaj deklivoj de l' monteto, silente, rampante tra la arboj, kvazaŭ ili ĉasus. Gimlio tenis sian hakilon en la mano, kaj Legolaso sian longan tranĉilon; ĉiuj liaj sagoj estis uzitaj. Kiam ili atingis la maldensejon, ili haltis mirigite; kaj poste ili stans momenton kun dolore klinitaj kapoj, ĉar ŝajnis al ili evidente, kio okazis.

— Ve! — diris Legolaso, irinte al Aragorno. — Ni persekutis kaj mortigis multajn orkojn en la arbaro, sed ni pli utilus ĉi tie. Ni venis aŭdinte la kornon, sed tro malfrue, videble. Timeble vi grave vundiĝis.

— Boromiro estas mortinta, — diris Aragorno. — Mi estas netuŝita, ĉar mi ne ĉeestis kun li. Li mortis defendante la hobitojn, dum mi estis sur la monteto.

— La hobitojn! — ekkriis Gimlio. — Do kie ili estas? Kie estas Frodo?

— Mi ne scias, — lace respondis Aragorno. — Antaŭ la morto Boromiro diris, ke la orkoj ligis ilin; laŭ lia opinio ili ne estis mortintaj. Mi sendis lin sekvi Gajan kaj Grinĉjon; sed mi ne demandis, ĉu Frodo aŭ Sam ĉeestis, ĝis tro malfrue. Ĉiu mia hodiaŭa faro rezultis misa. Kion fari nun?

— Unue necesas prizorgi la falinton, — diris Legolaso. — Ne konvenas lasi lin kuŝanta kvazaŭ bestkadavro inter tiuj fiaj orkoj.

— Sed ni devas rapidi, — diris Gimlio. — Li ne volus, ke ni restu longe. Ni devas sekvi la orkojn, se restas espero, ke iuj el nia Kunularo estas vivaj kaptitoj.

— Tamen ni ne scias, ĉu la Ringoportanto estas kun ili aŭ ne, — diris Aragorno. — Ĉu indas forlasi lin? Ĉu ni ne serĉu unue lin? Antaŭ ni estas aĉa elekto!

— Do ni faru unue tion, kion nepras fari, — diris Legolaso. — Mankas al ni tempo kaj laboriloj por taŭge entombigi nian kamaradon aŭ starigi super li tumulon. Eble ŝtonamason ni povus konstrui.

— Tia laboro estus longa kaj malfacila: mankas ŝtonoj uzeblaj pli proksime ol apudrivere, — diris Gimlio.

— Do, ni kuŝigu lin en boato kune kun liaj armiloj, kaj la armiloj de liaj venkitaj malamikoj, — diris Aragorno. — Ni sendu lin al la Raŭrosa akvofalo kaj donu lin al Anduino. La Gondora Rivero almenaŭ zorgos, ke neniu fikreaĵo malhonoru liajn ostojn.

Ili rapide traserĉis la kadavrojn de la orkoj, amasigante ties glavojn, fenditajn kaskojn kaj ŝildojn.

— Vidu, — ekkriis Aragorno. — Jen ni trovas signojn! — El la amaso da minacaj armiloj li levis du tranĉilojn, foliklingajn, damaskenitajn per oro kaj ruĝo; kaj post plua serĉado li trovis ankaŭ la nigrajn ingojn, ornamitajn per etaj ruĝaj gemoj. — Ne orkaj iloj! Tiujn portis hobitoj. Sendube la orkoj prirabis ilin, sed timis reteni la tranĉilojn, ĉar ili sciis, kio ili estas: laboraĵoj de Okcidentio, envolvitaj per sorĉaĵoj por misfartigi Mordoron. Nu, do, se ili ankoraŭ vivas, niaj amikoj estas senarmilaj. Mi prenos la jenaĵon, firme esperante redoni ilin.

— Kaj mi, — diris Legolaso, — kunprenos ĉiujn sagojn troveblajn, ĉar mia sagujo malplenas. — Li traserĉis la amason kaj la ĉirkaŭan teron kaj trovis multajn, kiuj estis nedifektitaj kaj stange pli longaj ol la sagoj, kiujn la orkoj kutimis uzi. Li rigardis tre proksime ilin.

Aragorno rigardis la mortigitojn kaj diris:

— Ĉi tie kuŝas multaj nemordoranoj. Iuj venis el la nordo, el la Nebulecaj Montoj, se mi konas iom la orkojn kaj ties specojn. Kaj jen estas aliaj nekonataj al mi. Ilia ekipaĵo tute ne estas orkeca.

Troviĝis kvar goblenaj soldatoj stature pli grandaj, malpalaj, oblikv-okulaj, kun dikaj kruroj kaj grandaj manoj. Ili estis armitaj per mallongaj larĝklingaj glavoj, ne per la kurbaj scimitaroj kutimaj ĉe orkoj; kaj ili havis pafarkojn taksusajn laŭ longo kaj laŭ formo similajn al pafarkoj de la homoj. Sur iliaj ŝildoj vidiĝis stranga blazono: blanka mano meze de nigra

fono; sur la antaŭo de iliaj feraj kaskoj estis metita runo “S” forĝita el iu blanka metalo.

— Tiajn signojn mi neniam antaŭe vidis, — diris Aragorno. — Kion ili signifas?

— “S” signifas Saŭrono, — diris Gimlio. — Tion oni facile legas.

— Ne! — diris Legolaso. — Saŭrono ne uzas elfajn runojn.

— Li ankaŭ ne uzas sian propran nomon, nek permesas ĝin uzi skribe aŭ parole, — diris Aragorno. — Kaj blankon li ne uzas. Orkoj servantaj al Baraduro uzas la signon de la Ruĝa Okulo. — Momente li staris pensante. — “S” signifas Sarumano, mi supozas, — li diris finfine. — En Isengardo okazas misaĵoj, kaj la okcidento ne plu sekuras. Estas tiel, kiel Gandalfo timis: iel la perfidulo Sarumano sciiĝis pri nia vojaĝo. Tre verŝajne li ankaŭ scias pri la falo de Gandalfo. Persekutantoj el Morio eble evitis la atenton de Lorieno, aŭ eble ili ne trapasis tiun landon kaj venis al Isengardo laŭ aliaj vojoj. Orkoj vojaĝas rapide. Kaj Sarumano havas multajn rimedojn por ekkoni novaĵojn. Ĉu vi memoras la birdojn?

— Nu, mankas al ni tempo solvi enigmojn, — diris Gimlio. — Ni forportu Boromiron!

— Sed poste ni devos solvi la enigmojn, se ni volas elekti ĝuste nian farotaĵon, — respondis Aragorno.

— Eble ne troviĝas elekto ĝusta, — diris Gimlio.

Per sia hakilo la gnomo tranĉis plurajn branĉojn. Tiujn oni kunligis per pafarkaj ŝnuroj kaj sternis siajn mantelojn sur la framon. Sur tiu kruda kadavroportilo ili portis la korpon de sia kunulo ĝis la bordo kune kun elektitaj trofeoj de lia lasta batalo forsendotaj kun li. Kvankam la vojo estis mallonga, ili trovis la taskon nefacila, ĉar Boromiro estis homo tiel alta kiel forta.

Aragorno restis apud la akvofluo, gardante la portilon, dum Legolaso kaj Gimlio rapidis perpiede reen al Part Galeno. Temis pri mejlo aŭ pli, kaj pasis iom da tempo antaŭ ol ili revenis, rapide padelante du boatojn laŭlonge de la bordo.

— Stranga afero estas rakontenda! — diris Legolaso. — Troviĝis nur du boatoj sur la bordo. Ni trovis neniun postsignon de la tria.

— Ĉu orkoj estintis tie? — demandis Aragorno.

— Ni vidis neniun signon pri ili, — respondis Gimlio. — Kaj orkoj forprenus aŭ detruus ĉiujn boatojn, kaj krome la pakaĵojn.

— Mi esploros la teron, kiam ni venos tien, — diris Aragorno. Ili kuŝigis Boromiron meze de l’ boato, kiu lin forportos. La grizan kapuĉon kaj la elfan mantelon ili faldis kaj metis sub lian kapon. Ili kombis liajn longajn malblondajn harojn kaj aranĝis ilin ĉe liaj ŝultroj. La ora zono de

Lorieno ekbrilis ĉirkaŭ lia talio. Lian kaskon ili metis apude, kaj sur lia sino ili metis la fenditan kornon kaj la tenilon kaj splitojn de lia glavo; sub liajn piedojn ili metis la glavojn de liaj malamikoj. Poste, liginte la pruon al la poŭpo de l' alia boato, ili trenis lin sur la akvon. Triste ili remis laŭ la bordo, kaj enirinte la rapidan fluon ili pasis la verdan herbejon de Part Galeno. La abruptaj deklivoj de Tol Brandiro ardis: estis jam meze de l' posttagmezo. Dum ili iris suden, la fumo de Raŭroso leviĝis kaj tremetis antaŭ ili, ora nebuleto. La impeto kaj tondro de la akvofalo skuis la senventan aeron.

Malĝoje ili liberigis la sepultan boaton: tie kuŝis Boromiro, trankvila, paca, glisante sur la sino de la fluanta akvo. La rivero akceptis lin, dum ili retenis la propran boaton per la remiloj. Li pasis ilin flose, kaj malrapide foriris lia boato, velkante kiel malhela punkto antaŭ la ora lumo, kaj poste ĝi malaperis subite, Raŭroso plu muĝis senŝanĝe. La Rivero akceptis Boromiron, filon de Denetoro, kaj oni ne plu vidis lin en Minaso Tirit, staranta kiel li antaŭe staris sur la Blanka Turego matene. Sed dum postaj tagoj en Gondoro estis dumlonge dirite, ke la elfa boato trarajdis la akvofalojn kaj la ŝaŭmantan lageton, kaj portis lin tra Osgiliado, trans la multbuŝan Anduinon, ĝis nokte sur la Grandan Maron sub la steloj.

Dum kelka tempo la tri kunuloj restis silentaj, postrigardante lin. Tiam ekparolis Aragorno:

— De la Blanka Turego oni elrigardos por li, — li diris, — sed li revenos nek de l' montaro nek de la maro. — Poste li ekkantis malrapide:

Tra l' kampoj de Rohano, kie longa herb' sin trovas,
la okcidenta vent' promenas, ĉirkaŭ muroj blovas.
"Kia novaĵ', ho vaga vent', el okcidento nuna?
Ĉu Boromiron vidis vi per stela lum' aŭ luna?" —
"Mi vidis lin rajdantan tra sep larĝaj grizaj rojoj;
mi vidis lin marŝantan laŭ senhomaj terovojoj
en ombrojn de la nordo. Poste pasis li de l' vido.
Ĉu kornon aŭdis norda vent' de l' Denetora ido?" —
"Ho Boromir', mi okcidenten gvatis for de l' muroj,
sed vi ne venis el la vaka land' sen homaj spuroj".

Poste kantis Legolaso:

De l' ŝtonaj dunoj de la mar' la suda vento fuĝas;
ĝi aŭdas kriĉojn de l' mevar', kaj ĉe la pordo muĝas.
"Kiaj novaĵoj el la sud', ho vent', vespere listas?
Kie la bela Boromir'? Li tardas, kaj mi tristas". —
"Min ne demandu, kie li — la ostoj ja tro multas
sur la malhelaj bordoj, kie la ĉiel' tumultas;

tiom trapasis Anduinon cele al la maro.
Demandu al la norda vent' pri ties senditaro!" —
"Ho Boromir'! De l' pord' la voj' kondukas al la sudo,
sed vi ne venis kun la mevoj de la mar-elsputo".

Poste kantis denove Aragorno:

De l' Reĝa Pord' nordvento rajdas preter akvofalo;
kaj fride ĉirkaŭ la tureg' aŭdiĝas korna knalo.
"Kiajn novaĵojn el la nord' hodiaŭ vent' atestas?
Kio pri brava Boromiro? Longe li forestas". —
"Mi aŭdis lin sub Amon Hen. Li pruvis sian bravon.
Ĝisakven oni portis la rompitajn ŝildon, glavon.
La membrojn en fiera bel' sepultis oni ĝuste;
Kaj ora Raŭros-akvofalo portis lin surbruste". —
"Ho Boromir'! La Garda Tur' rigardos kun obstino
al ora Raŭros-akvofalo ĝis la tempofino".

Tiel ili finis. Poste ili turnis sian boaton kaj pelis ĝin laŭeble rapide kontraŭ la fluo reen ĝis Part Galeno.

— Vi lasis al mi la orientan venton, — diris Gimlio, — sed nenion mi diros pri ĝi.

— Tiel estas konvene, — diris Aragorno. — En Minaso Tirit oni toleras la orientan venton, sed oni ne petas de ĝi novaĵojn. Sed jam Boromiro laŭiris sian vojon, kaj ni devas senprokraste elekti la propran.

Li rigardesploris la verdan herbejon, rapide, sed konscience, ofte kliniĝante teren.

— Neniuj orkoj pasis sur tiu ĉi grundo. Krom tio, nenio estas kun certo videbla. Ĉiuj niaj paŝoj troviĝas, transire kaj retroire. Mi ne povas konkludi, ĉu iuj hobitoj revenis post kiam komenciĝis la serĉo por Frodo. — Li revenis al la bordo, proksime al kie la flueto el la fonto likiĝis en la riveron. — Ĉi tie estas kelkaj klaraj spuroj. Hobito paŝis en la akvon kaj returnen; sed mi ne povas konkludi, antaŭ kiom da tempo.

— Kiel do vi solvas ĉi enigmon? — demandis Gimlio. Aragorno ne tuj respondis, sed reiris al la kampadejo kaj rigardis la pakaĵojn.

— Du tornistroj mankas, — li diris, — kaj unu el ili certe estas tiu de Sam: ĝi estis iom granda kaj peza. Jen do la respondo: Frodo foriris boate, kaj akompanis lin lia servisto. Frodo certe revenis, dum ni ĉiuj forestis. Mi renkontis Samon suprenirantan kaj diris, ke li sekvu min; sed evidente li tion ne faris. Li divenis la intencon de sia mastro kaj revenis ĉi tien antaŭ ol Frodo ekiris. Tiu ne trovis facile postlasi Samon!

— Sed kial li nin postlasis, kaj senmesaĝe? — diris Gimlio. — Jen,

stranga faro!

— Kaj faro kuraĝa, — diris Aragorno. — Sam pravis, ŝajnas al mi. Frodo ne volis konduki kun si amikon al morto en Mordoro. Sed li sciis, ke li devas iri mem. Okazis io post kiam li forlasis nin, kio venkis liajn timon kaj dubon.

— Eble ĉasantaj orkoj trovis lin kaj li fuĝis, — diris Legolaso.

— Li fuĝis, certe, — diris Aragorno, — sed mi opinias, ke ne de orkoj. — Sian opinion pri la kaŭzo de l' subitaj decidiĝo kaj fuĝo de Frodo Aragorno ne esprimis. La lastajn vortojn de Boromiro li longe tenis sekretaj.

— Nu, almenaŭ tiom nun klaras, — diris Legolaso. — Frodo ne plu troviĝas ĉi-flanke de l' rivero: preni la boaton povis nur li. Kaj Sam estas kun li; sian tornistron preni volus nur li.

— Nia elekto do estas, — diris Gimlio, — aŭ preni la restantan boaton kaj sekvi Frodon, aŭ sekvi la orkojn perpiede. Ĉu tiel aŭ aliel, restas malmulte da espero. Ni jam perdis valorajn horojn.

— Lasu min pensi! — diris Aragorno. — Kaj nun, ke mi elektu ĝuste, kaj ŝanĝu la misan sorton de tiu ĉi malfeliĉa tago! — Momente li staris silenta, kaj finfine diris: — Mi sekvos la orkojn. Mi gvidus Frodon al Mordoro kaj akompanus lin ĝis la fino; sed se mi nun serĉos lin en la sovaĝejo, necesos forlasi la kaptitojn al turmentado kaj morto. Mia koro fine parolas klare: la sorto de l' Portanto ne plu troviĝas en miaj manoj. La Kunularo finludis sian rolon. Tamen ni la restantoj ne rajtas forlasi niajn kunulojn dum restas al ni forto. Venu! Ni foriros nun. Postlasu ĉion nenecesan! Ni urĝe iros antaŭen tage kaj nokte!

Ili eltrenis la lastan boaton kaj portis ĝin al la arboj. Ili metis sub ĝin ĉiujn posedaĵojn nebezonatajn kaj neporteblajn. Poste ili forlasis Parton Galenon. La posttagmezo jam velkis, dum ili revenis al la verdejo, kie pereis Boromiro. Tie ili retrovis la spurojn de la orkoj. Trovi ilin ne postulis multe da lerto.

— Neniu alia popolo kulpas tian trampladon, — diris Legolaso. — ŝajnas, ke ili ĝuas tranĉi kaj disbati kreskaĵojn, kiuj eĉ ne baras al ili la vojon.

— Malgraŭ tio ili iras tre rapide, — diris Aragorno, — kaj ili ne laciĝas. Kaj poste ni eble devos trovi la vojon sur terenoj malmolaj kaj nudaj.

— Nu, ni sekvu ilin! — diris Gimlio. — Ankaŭ gnomoj kapablas iri rapide, kaj ili ne laciĝas pli frue ol orkoj. Sed estos longa ĉasado, ili longe avantaĝas.

— Jes, — diris Aragorno, — ni bezonos la tutan eltenemon de la gnomoj. Sed ek! Kun aŭ sen espero ni sekvu la spurojn de niaj malamikoj. Kaj ve al ili, se ni pruviĝos la pli rapidaj! Ni plenumos tian persekuton, kian

oni taksos mirindaĵo inter la tri rasoj: elfoj, gnomoj kaj homoj. Antaŭen la tri ĉasantoj!

Cervece li saltiris. Inter la arbojn li rapidis. Ĉiam antaŭen li gvidis ilin, senlaca kaj rapidega, ĉar lia menso jam estis senhezita. La arbaron ĉirkaŭ la lago ili postlasis. Longajn deklivojn ili supreniris, malhelajn, duregajn kontraŭ la ĉielo jam sunsubire ruĝa. Venis la krepusko. Ili forpasis, grizaj ombroj en ŝtonoza lando.

2

La rajdistoj el Rohano

La krepusko profundiĝis. Nebuleto postkuŝis ilin inter la subaj arboj, kaj mornis sur la palaj randoj de Anduino, sed la ĉielo estis klara. Steloj ekaperis. La kreskanta luno estis en okcidento, kaj la ombroj de l' rokoj nigris. Ili alvenis la subon de ŝtonozaj deklivoj, kaj ilia iro pli lantis, ĉar la spuroj ne plu facile sekveblis. Ĉi tie la altaĵoj de Emin Muilo direktiĝis el la nordo suden laŭ du longaj spinoj falintaj. La okcidenta flanko de ambaŭ spinoj apikis kaj malfacilis, sed la orientaj flankoj malpli abruptis, sulkitaj de abundaj ravinetoj kaj mallarĝaj fendegaĵoj. La tutan nokton la tri kunuloj skrablis sur tiu osteca tero, grimpante ĝis la supro de l' unua kaj pli alta spino, kaj suben denove en la mallumon de profunda serpentumanta valo aliflanke. Tie dum la senmova friska horo antaŭ la aŭroro ili ripozis mallongan tempon. La luno jam delonge subeniris antaŭ ili, la steloj briletis supre; la unua taga lumo ankoraŭ ne alvenis trans la malhelajn montetojn malantaŭe. Provizore Aragorno ne sciis, kion fari: la orkaj spuroj malsupreniris en la valon, sed tie malaperis.

— Kien ili turniĝis, laŭ via opinio? — diris Legolaso. — Ĉu norden por sekvi vojon pli rektan al Isengardo, aŭ Fangorno, se tien ili celas laŭ via supozo? Aŭ suden por trafi Entvaŝon?

— Ili ne direktiĝis al la rivero, kie ajn ilia celo, — diris Aragorno. — Kaj krom se multo misas en Rohano, kaj multe plifortiĝis la potenco de Sarumano, ili sekvos la plej mallongan vojon troveblan trans la kampojn de l' rohananoj. Ni serĉu norde!

La valeto direktiĝis kvazaŭ ŝtonoza trogo inter la firstitaj montetoj, kaj malabunda rojo fluis inter la rokoj ĉefunde. Klifo brovumis dekstre; maldekstre leviĝis grizaj deklivoj, malklaraj kaj ombrecaj en la malfrua nokto. Ili progresis norden tra mejlo aŭ pli. Aragorno serĉadis, klinite al la tero inter la faldaĵoj kaj ravinetoj kondukantaj supren al la okcidenta spino. Legolaso troviĝis iom antaŭe. Subite la elfo ekkriis kaj la aliaj venis al li kurante.

— Ni jam atingis kelkajn el la ĉasatoj, — li diris. — Rigardu! — Li fingromontris, kaj ili vidis, ke tio, kion ili pli frue supozis rokoj kuŝantaj ĉe la subo de l' deklivo, estis kunpremiĝantaj kadavroj. Tie kuŝis kvin mortaj orkoj. Ili estis hakitaj per multaj kruelaj batoj, kaj du estis senkapigitaj. La tero malsekis pro ilia malhela sango.

— Jen alia enigmo! — diris Gimlio. — Sed por ĝi necesas la taga lumo, kaj ĝis tiam ni ne povas atendi.

— Nu tamen, kiel ajn oni interpretas ĝin, tio ŝajnas ne malesperiga, — diris Legolaso. — Malamikoj de la orkoj tre verŝajne estas amikoj niaj. Ĉu loĝas iuj personoj en tiuj ĉi montoj?

— Ne, — diris Aragorno. — La rohananoj malofte venas ĉi tien, kaj tre malproksime estas de Minaso Tirit. Povas esti, ke ĉasis ĉi tie iu homgrupo pro kialoj al ni nekonataj. Tamen ŝajnas al mi, ke ne.

— Kion vi opinias? — diris Gimlio.

— Mi opinias, ke la malamikoj kunportis kun si proprajn malamikojn, — respondis Aragorno. — Ĉi tiuj estas nordaj orkoj de tre malproksime. Inter la mortigitoj troviĝas neniu el la grandaj orkoj kun la strangaj insignoj. Okazis kverelo, mi konjektas: tio ne maloftas ĉe tiu ĉi fispecio. Eble okazis disputo pri la sekvota vojo.

— Aŭ pri la kaptitoj, — diris Gimlio. — Ni esperu, ke ne finis la vivon ĉi tie ankaŭ ili.

Aragorno priserĉis la teron tra larĝa cirklo, sed ne troveblis pluaj spuroj de la lukto. Ili pluiris. Jam la orienta ĉielo ekpaliĝis; la steloj velkis, kaj griza lumo malrapide plifortiĝis. Iom pli norde ili alvenis terfaldaĵon, en kiu eta rojo, fale kaj serpentume, estis tranĉinta ŝtonozan padon suben en la valon. En tiu kreskis arbustoj, kaj sur la flankoj estis bedoj da herbo.

— Fine! — diris Aragorno. — Jen la spuroj serĉitaj! Supren laŭ tiu ĉi rojo: tiun vojon sekvis la orkoj post sia debato.

Rapide la ĉasantoj nun sin turnis kaj laŭiris la novan padon. Kvazaŭ freŝaj post tutnokta ripozo ili saltis de ŝtono al ŝtono. Fine ili atingis la supron de l' griza monteto, kaj subita vento trablovis iliajn harojn kaj movigis iliajn mantelojn: frida aŭrora vento.

Returniĝinte ili vidis trans la rivero la malproksimajn montojn ĉenditaj. Tago ensaltis la ĉielon. La ruĝa rando de l' suno leviĝis super la ŝultrojn de l' malhela lando. Antaŭ ili en la okcidento la mondo kuŝis senmova, senforma kaj griza: sed, jam dum ili rigardis, la ombroj de l' nokto velkis, la koloroj de la vekiĝanta tero revenis: verdo trafluis la larĝajn herbejojn de Rohano, muaris la blankaj nebuletoj en la akvovaletoj; kaj fore maldekstre, je tridek leŭgoj aŭ pli, blua kaj purpura staris la Blanka Montaro, leviĝanta al pintoj gagataj kaptuŝitaj de briletaj neĝoj, tinkturitaj de la matena ruĝo.

— Gondoro! Gondoro! — kriis Aragorno. — Se nur mi rigardus vin denove en horo pli feliĉa! Ankoraŭ ne kuŝas mia vojo suden al viaj helaj riveretoj.

Gondor'! Gondoro, kie blovis vento okcidenta,
ĉe l' montoj kaj la maro; la lum' sur Arb' Arĝenta

falis kiel hela pluvo al la Reĝ-gazono.
Fieraj muroj! Blankaj turoj! Oraj kron' kaj trono!
Ho Gondor'! ĉu iam plu vidiĝos Arb' Arĝenta,
aŭ al mont' kaj maro blovos vento okcidenta?

— Jam ni iru! — li diris, fortrenante siajn okulojn de la sudo, kaj elrigardante okcidenten kaj norden al la vojo devige plandota.

La firsto, sur kiu staris la kunuloj, descendis apike antaŭ iliaj piedoj. Sub ĝi je pli ol dudek klaftoj, troviĝis breto larĝa kaj malglata, kiu subite finiĝis je la rando de apika klifo: la Orienta Muro de Rohano. Tiel finiĝis Emin Muilo, kaj antaŭ ili etendiĝis la verdaj herbejoj de la rohananoj ĝis la ekstremo de vidivo.

— Rigardu! — kriis Legolaso, indikante supren en la palan ĉielon. — Jen denove la aglo! Ĝi estas tre alte. Ĝi ŝajnas forflugi nun, el tiu ĉi lando norden denove. Ĝi iras rapidege. Rigardu!

— Ne, eĉ miaj okuloj ne povas vidi ĝin, bona Legolaso, — diris Aragorno. — Ĝi ja devas esti tre alte. Mi scivolas, kia estas ĝia komisio, se temas pri la sama birdo, kiun mi vidis pli frue. Sed vidu! mi povas vidi ion pli proksiman kaj pli urĝan; io moviĝas trans la ebenaĵon!

— Multo, — diris Legolaso. — Ĝi estas multnombra piedirantaro; sed nenion plian mi povas diri, nek vidi, kia specio ili estas. Ili foras multajn leŭgojn: dek du, mi konjektas, sed la plateco de la ebenaĵo malfacile mezureblas.

— ŝajnas al mi tamen, ke ni jam ne bezonas spurojn por indiki la irotan vojon, — diris Gimlio. — Ni trovu vojon suben al la kampoj laŭeble rapide.

— Dubinde, ke vi trovos padon pli rapidan ol tiu de la orkoj elektita, — diris Aragorno.

Nun ili sekvis la malamikojn en la klara taglumo. Ŝajnis, ke la orkoj urĝe progresis kiel eble plej haste. De tempo al tempo la persekutantoj trovis aĵojn faligitajn aŭ forĵetitajn: nutraĵsakoj, ŝeloj kaj krustoj de malmola griza pano, ŝirita nigra mantelo, peza fernajla ŝuo rompita pro la ŝtonoj. La spuroj gvidis ilin norden laŭ la supro de la klifego, kaj finfine ili alvenis profundan fendaĵon tranĉitan en la rokaĵo per rojo, kiu plaŭdis laŭte malsupren. En la mallarĝan ravinon descendis kruda pado ŝtuparece ĝis la ebenaĵo.

Sube ili alvenis strange subite al la herbejo de Rohano. Tiu ŝvelis verdmare ĝis la piedo mem de Emin Muilo. La falanta rojo malaperis en profundan kreskaĵon el kresoj kaj akvo-plantaĵoj, kaj ili povis aŭdi ĝin fortinti en verdaj tuneloj, laŭ longaj malabruptaj deklivoj al la marĉejoj de la malproksima Entvaŝa Valo. Ili ŝajnis esti lasintaj la vintron kroĉiĝanta al la malantaŭaj montetoj. Ĉi tie la aero estis pli malmola kaj pli varma, kaj

sentrude parfumanta, kvazaŭ la printempo jam estiĝus kaj la suko denove ekfluus en plantaĵoj kaj folioj. Legolaso profunde enspiris, kvazaŭ iu kiu trinkus ampleksan glutaĵon post longa soifado en malfekundaj lokoj.

— Ha! la odoro verda! — li diris. — Pli profitas ol multe da dormado. Ni kuru!

— Malpezaj kruroj povas kuri rapidege ĉi tie, — diris Aragorno. — Pli rapide, eble, ol ferŝuitaj orkoj. Nun ni havas eblon malpliigi ties avantaĝon!

Ili iris spalire, kurante kvazaŭ dogoj pro forta aromo, kaj en iliaj okuloj estis arda lumo. Preskaŭ rekte okcidenten la larĝa falĉvojo de la marŝantaj orkoj tramplis sian malbelan fendon; la dolĉa herbo de Rohano estis kontuzita kaj nigrigita pro ilia pasado. Baldaŭ Aragorno eligis krion kaj turniĝis flanken.

— Atendu! — li kriis. — Ankoraŭ ne sekvu min!

Li kuris rapide dekstren, for de la ĉefvojo; ĉar li ekvidis piedsignojn, kiuj iris tiudirekten, disbranĉiĝintaj de la aliaj, signoj de etaj senŝuaj piedoj. Tiuj tamen ne diste iris antaŭ ol ilin surtretis orkaj spuroj, kiuj ankaŭ lasis la ĉefvojon antaŭe kaj malantaŭe, kaj poste ili rekurbiĝis abrupte kaj perdiĝis en la tramplado. Ĉe la plej malproksima limo Aragorno kliniĝis kaj kaptis ion en la herbo; poste li retrokuris.

— Jes, — li diris, — ili estas tute klaraj: piedsignoj de hobito. De Grinĉjo, mi opinias. Li pli etas ol la alia. Kaj vidu jenon! — Li levis ion, kio ekbriletis en la sunlumo. Ĝi aspektis kiel nove-aperta folio de fago, bela kaj stranga en tiu senarba ebenaĵo.

— Broĉo de elfa mantelo! — ekkriis kune Legolaso kaj Gimlio.

— Ne sencele falas la folioj de Lorieno, — diris Aragorno. — Tio ĉi ne falis hazarde: ĝi estis forĵetita kiel signo al eventualaj sekvontoj. Mi opinias, ke tiucele Grinĉjo forkuris de l' ĉefrojo.

— Tiuokaze li almenaŭ estis viva, — diris Gimlio. — Kaj li povis utiligi sian spriton kaj ankaŭ siajn krurojn. Tio estas kuraĝiga. Ne vane ni persekutas.

— Ni esperu, ke li ne tro kare pagis sian aŭdacon, — diris Legolaso. — Ek! Ni pluiru! La penso, ke tiuj gajaj junuloj estas pelataj kvazaŭ brutoj, bruligas mian koron.

La suno grimpis ĝis la zenito kaj poste iris malrapide suben sur la ĉielo. Malpezaj nuboj supreniĝis el la maro en la malproksima sudo kaj forbloviĝis per venteto. La suno sinkis. Ombroj leviĝis malantaŭe kaj etendis longajn brakojn al la oriento. Daŭre la persekutantoj eltenis. Pasis jam unu tago, depost kiam Boromiro venkiĝis, kaj la orkoj daŭre troviĝis tre antaŭe. Ili ne plu vidiĝis sur la plataj ebenaĵoj.

Kiam noktombro envolvis ilin, Aragorno haltis. Nur dufoje dum la taga

marŝo ili estis mallonge ripozintaj, kaj dek du leŭgoj nun apartigis ilin de tiu orienta murego, sur kiu ili staris tagiĝe.

— Ni venis finfine al elekto malfacila, — li diris. — Ĉu ni ripozu nokte, aŭ ni pluiru, dum eltenas niaj volo kaj forto?

— Krom se ripozos ankaŭ niaj malamikoj, ili nin postlasos tre malproksime, se ni haltos por dormi, — diris Legolaso.

— Ĉu eĉ orkoj devas ripozi dum marŝado? — diris Gimlio.

— Malofte orkoj vojaĝas nekaŝite sub la suno, tamen tiuj faras tion, — diris Legolaso. — Certe ili ne ripozos nokte.

— Sed se ni marŝos nokte, ni ne povos sekvi iliajn spurojn, — diris Gimlio.

— La vojo estas rekta kaj turniĝas nek dekstren nek maldekstren, kiom kapablas vidi miaj okuloj, — diris Legolaso.

— Eble mi povus gvidi vin konjekte en la mallumo kaj teni la linion, — diris Aragorno, — sed se ni devius, aŭ ili turniĝus flanken, poste kiam venus la lumo, eble okazus multe da prokrasto, antaŭ ol la spuroj estus retrovitaj.

— Kaj pripensindas ankaŭ jeno, — diris Gimlio: — nur tage ni povos vidi, ĉu iuj spuroj flanken iras. Se eskapus kaptito, aŭ se unu estus forportita, ni diru orienten al la Granda Rivero, al Mordoro, ni eble preterpasus la spurojn senscie.

— Tio veras, — diris Aragorno. — Sed se mi senerare interpretas tiujn jam pasitajn signojn, la orkoj de la Blanka Mano venkis, kaj la tuta bando nun direktiĝas al Isengardo. Ilia aktuala direkto konfirmas tion.

— Sed estus malprudente certi pri iliaj interkonsiliĝoj, — diris Gimlio. — Kaj kio pri eskapo? En mallumo ni preterpasus la spurojn, kiuj gvidis vin al la broĉo.

— La orkoj duoble atentos post tio, kaj la kaptitoj pli lacos, — diris Legolaso. — Ne plu okazos eskapo, krom se ni ĝin aranĝos. Kiel fari tion estas nekonjekteble, sed unue ni devos atingi ilin.

— Tamen eĉ mi, gnomo multe vojaĝinta kaj ne la malplej hardita el mia raso, ne povas kuri la tutan vojon ĝis Isengardo senpaŭze, — diris Gimlio. — Ankaŭ en mi brulegas la koro, kaj mi estus ekirinta pli frue; sed nun mi devas iom ripozi por poste kuri pli bone. Kaj se ni ripozu, la blinda nokto plej konvenas por tio.

— Mi ja diris, ke la elekto estas malfacila, — diris Aragorno. — Kiel ni finu ĉi diskuton?

— Vi estas nia gvidanto, — diris Gimlio, — kaj vi lertas pri ĉasado. Elektu vi.

— Mia koro ordonas pluiri, — diris Legolaso. — Sed necesas, ke ni agu

komune. Mi faros laŭ via decido.

— Vi donas la elekton al mallerta elektanto, — diris Aragorno. — De kiam ni trapasis Argonaton, ĉiuj miaj elektoj misis. — Li silentiĝis, rigardante longtempe norden kaj okcidenten en la densiĝantan nokton. — Ni ne marŝos en la mallumo, — li diris finfine. — La danĝero maltrafi la vojon aŭ signojn de alies venado-irado ŝajnas al mi granda. Se la luno havigus sufiĉe da lumo ni utiligus ĝin, sed ve! ĝi malleviĝas frue kaj ankoraŭ junas kaj palas.

— Kaj hodiaŭ nokte ĝi estas ĉiuokaze vualita, — Gimlio murmuris. — Se nur la Damo donintus al ni lumon, tian donacon, kian ŝi donis al Frodo!

— Ĝi pli necesos tie, kie ĝi estas donita, — diris Aragorno. — Ĉe li troviĝas la aŭtentika serĉo. La nia estas bagatela inter la aktualaj faroj. Vana persekuto ekde la komenco, eble, kiun neniu mia elekto povas fuŝi aŭ fliki. Nu, mi elektis. Do, ni uzu la tempon laŭeble plej trafe!

Li sin ĵetis teren kaj tuj endormiĝis, ĉar li ne dormis post ilia nokto sub la ombro de Tol Brandiro. Antaŭ ol aŭroro estis surĉiela li vekiĝis kaj stariĝis. Gimlio plu dormis profunde, sed Legolaso staris rigardante norden en la mallumon, pensema kaj silenta kiel juna arbo en senventa nokto.

— Ili estas tre tre malproksimaj, — li diris malĝoje, sin turnante al Aragorno. — Mi scias en la koro, ke ili ne ripozos ĉi-nokte. Nur aglo povus atingi ilin nun.

— Malgraŭ tio ni daŭre persekutos laŭ niaj kapabloj, — diris Aragorno. Kliniĝante li vekis la gnomon. — Ek! Ni devas iri, — li diris. — La postaromo forvelkiĝas.

— Sed estas ankoraŭ mallume, — diris Gimlio. — Eĉ Legolaso sur montopinto ne povus vidi ilin ĝis la suno leviĝos.

— Timeble ili preterpasis mian vidivon de sur monto aŭ ebenaĵo, sub luno aŭ suno, — diris Legolaso.

— Kie vidivo ne kapablas, la tero eble havigos al ni informojn, — diris Aragorno. — La tero nepre ĝemas sub iliaj malmolaj plandoj. — Li etendis sin sur la teron kun la orelo premita al la herbaĵo. Li kuŝis tie senmove, tiel longe, ke Gimlio scivolis, ĉu li svenis aŭ reendormiĝis. Aŭroro venis muare, kaj malrapide kreskis ĉirkaŭ ili griza lumo. Finfine li stariĝis, kaj nun la amikoj povis vidi lian vizaĝon: ĝi estis pala kaj streĉita, kaj li aspektis ĝenata.

— La tera rumoro estas malklara kaj konfuzita, — li diris. — Sur ĝi marŝas nenio en ĉirkaŭaĵo de multaj mejloj. Mallaŭtaj kaj foraj estas la piedoj de niaj malamikoj. Sed laŭtas hufoj de ĉevaloj. Venas en mian kapon, ke mi aŭdis tiujn, eĉ dum mi kuŝis dormante sur la tero, kaj ili ĝenis miajn

sonĝojn: ĉevaloj galopantaj, pasante en la okcidento. Sed jam ili pli malproksimiĝas de ni rajdante norden. Mi scivolas, kio okazas en tiu ĉi lando!

— Ni ekiru! — diris Legolaso.

Tiel komenciĝis la tria tago de ilia persekutado. Dum longaj horoj sub nuboj kaj intermita sunlumo ili apenaŭ paŭzis, jen paŝegante, jen kurante, kvazaŭ nenia laceco povis estingi la ardon, kiu brulis en ili. Ili malofte parolis. Tra la vasta soleco ili pasis, kaj iliaj elfaj manteloj fadis kontraŭ fono de la grize verdaj kampoj; eĉ en la friska sunlumo tagmeza malmultaj krom elfaj okuloj rimarkus ilin, ĝis ili proksimus. Ofte en la koro ili dankis al la Damo de Lorieno pro la donacitaj *lembasoj*, ĉar tion ili povis manĝi kaj trovi freŝan forton eĉ dum la kurado.

La tutan tagon la spuroj de la malamikoj direktiĝis rekte antaŭen, irante nord-okcidenten seninterrompe kaj sendevie. Kiam denove la tago proksimiĝis al sia fino, ili alvenis longajn senarbajn deklivojn, kie la tero leviĝis, ŝvelante supren al linio de malaltaj ĝibaj altaĵetoj antaŭe. La orkaj spuroj iĝis malpli klaraj, kiam ili kurbiĝis norden direkte al ili, ĉar la tero pli malmoliĝis kaj la herbo pli mallongiĝis. Fore maldekstre serpentumis Entvaŝo, arĝenta fadeno sur verda planko. Nenio moviĝanta videblis. Ofte Aragorno miris, ke ili vidis nenian signon pri bestoj aŭ homoj. La loĝejoj de la rohananoj plejparte troviĝis multajn leŭgojn for en la sudo, sub la arbarumitaj tegmentorandoj de la Blankaj Montoj, nun kaŝitaj en nebulo kaj nuboj. Tamen la ĉevalmastroj antaŭe paŝtigis multajn gregojn kaj virĉevalojn en la Orientujo, ĉi tiu orienta regiono de ilia regno, kaj tie la paŝtistoj multe vagadis, loĝante en kampadejoj kaj tendoj eĉ vintre. Sed nun la tuta lando estis senhoma, kaj regis silento, kiu ne ŝajnis la kvieto de paco.

En la krepusko ili denove haltis. Jam duoble dek du leŭgojn ili trapasis sur la ebenaĵoj de Rohano, kaj la muro de Emin Muilo estis malaperinta en la ombroj de l' oriento. La juna luno briletis sur nebuleca ĉielo, sed ĝi havigis malmulte da lumo, kaj la steloj estis vualitaj.

— Nun mi plej bedaŭras ripoztempon aŭ ĉiun halton dum nia ĉasado, — diris Legolaso. — La orkoj forkuris antaŭ ni, kvazaŭ la vipoj de Saŭrono mem estus malantaŭ ili. Timeble ili jam atingis la arbaregon kaj la malhelajn montetojn, kaj jam nun eniras en la ombrojn de la arboj.

Gimlio grincigis siajn dentojn.

— Jen amara fino de nia espero kaj de nia tuta penado! — li diris.

— De espero eble, sed ne de penado, — diris Aragorno. — Ni ne returniĝos ĉi tie. Tamen mi lacegas. — Li retrorigardis al la vojo trapasita, al la nokto oriente pliprofundiĝanta. — Io stranga influas en tiu ĉi lando. Mi malfidas la silenton. Mi malfidas eĉ la palan lunon. La steloj apenaŭ

videblas; kaj mi estas tiel lacega, kiel mi malofte estis antaŭe, lacega kiel neniu disirulo devus esti, kiam klaraj spuroj sekvendas. Ia volo subtenas rapidige niajn malamikojn kaj starigas antaŭ ni nevideblan barilon: lacego pli en la koro ol en la membroj.

— Vere! — diris Legolaso. — Tion mi scias ekde kiam ni descendis de Emin Muilo. Ĉar tiu volo estas ne malantaŭ ni, sed antaŭ ni. — Li fingromontris foren tra la lando Rohano en la malheliĝantan okcidenton sub la falĉilforma luno.

— Sarumano! — murmuris Aragorno. — Sed li ne retroenigos nin! Halti ni devos ankoraŭ unufoje; ĉar vidu! eĉ la luno enfalas densiĝantan nubon. Sed norde kuŝas nia vojo inter monteto kaj marĉo kiam la tago revenos.

Kiel antaŭe Legolaso estis la unua stariĝinto, se efektive li eĉ dormis.

— Vekiĝu! Vekiĝu! — li kriis. — Estas ruĝaŭrore. Strangaj aferoj atendas nin apud la arbarega rando. Ĉu bonaj, ĉu misaj, tion mi ne scias; sed ni estas vokitaj. Vekiĝu!

La aliaj saltleviĝis, kaj preskaŭ tuj ili ekvojaĝis. Lante proksimiĝis la montetoj. Ankoraŭ mankis unu horo antaŭ la tagmezo, kiam ili ĝisvenis ilin: verdaj deklivoj leviĝantaj al nudaj firstoj, kiuj etendiĝis en linio rekte norden. Sube la tero estis seka kaj la herbo mallonga, sed longa strio de sinkinta grundo, proksimume dek mejlojn larĝa, kuŝis inter ili kaj la rivero vaganta profunde en malklaraj densejoj fragmitaj kaj junkaj. Ĝuste okcidente de l' plej suda deklivo troviĝis granda ringo, kie la grundo estis ŝirita kaj batita de multaj tramplaj piedoj. El ĝi etendiĝis denove la orkaj spuroj, turniĝante norden laŭ la sekaj orloj de l' montetoj. Aragorno haltis kaj proksime ekzamenis la signojn.

— Ili ripozis ĉi tie kelkan tempon, — li diris, — sed eĉ la antaŭeniraj signoj estas jam malnovaj. Timeble via koro parolis veron, Legolaso: jam pasis trioble dek du horoj, laŭ mia konjekto, de kiam staris la orkoj, kie ni nun staras. Se ili pluiris samrapide, ili do hieraŭ je sunsubiro alvenis la bordon de Fangorno.

— Mi vidas nenion norde kaj okcidente krom herbon fadiĝantan en nebulon, — diris Gimlio. — Ĉu ni povus vidi la arbaregon se ni grimpus la montetojn?

— Ĝi ankoraŭ tre malproksimas, — diris Aragorno. — Se mi ĝuste memoras, tiuj montoj etendiĝas ok leŭgojn aŭ pli al la nordo, kaj poste nord-oriente al la elfluejo de Entvaŝo ankoraŭ etendiĝas larĝa tereno, ankoraŭ dek kvin leŭgojn eble.

— Nu, ni pluira, — diris Gimlio. — Miaj kruroj devos forgesi la leŭgojn. Ili tion farus des pli volonte se mia koro estus malpli peza.

La suno estis sinkanta, kiam finfine ili proksimiĝis al la montetlinio. Dum multaj horoj ili marŝis senripoze. Nun ili progresis malrapide, kaj la dorso de Gimlio estis kurbiĝinta. Rokduraj estas la gnomoj laborantaj aŭ vojaĝantaj, sed tiu senfina ĉasado komencis elĉerpi lin, dum espero tute velkis en lia koro. Aragorno marŝis malantaŭ li, morna kaj silenta, kliniĝante de tempo al tempo por ekzameni iun signon aŭ skrapaĵon sur la grundo. Nur Legolaso paŝis kiel ĉiam malpeze, liaj piedoj ŝajne apenaŭ premis la herbon, postlasante neniujn spurojn, dum li pasis; sed el la vojpano de la elfoj li ĉerpis tiom da nutraĵo, kiom li bezonis, kaj li povis dormi, se tion povas nomi dormo la homoj, ripozigante sian menson laŭ la strangaj padoj de elfaj sonĝoj, eĉ dum li marŝis apertokule en la lumo de la mondo.

— Ni supreniru sur tiun ĉi verdan monteton! — li diris. Lacege ili sekvis lin, grimpante la longan deklivon, ĝis ili alvenis la supron. Tiu estis ronda monteto glata kaj nuda, staranta aparte, la plej norda el la montetaro. La suno sinkis, kaj la vesperaj ombroj falis kurtenece. Ili troviĝis solaj en griza senforma mondo sen signo aŭ mezuro. Nur malproksime nord-okcidente estis mallumo pli profunda kontraŭ la velkanta lumo: la Nebulecaj Montoj kaj la suba arbarego.

— Nenion ni povas vidi por gvidi nin tien, — diris Gimlio. — Nu, denove ni devas halti kaj foruzi la nokton. Iĝas malvarme!

— Ventas el nordo elde la neĝo, — diris Aragorno.

— Kaj antaŭ la mateno ventos el la oriento, — diris Legolaso. — Sed ripozu, se tio necesas al vi. Tamen ne forĵetu ĉian esperon. Morgaŭ estas nekonata. Konsilo ofte troveblas ĉe la sunleviĝo.

— Tri sunoj jam leviĝis dum nia ĉasado kaj neniun konsilon alportis, — diris Gimlio.

La nokto pli kaj pli fridiĝis. Aragorno kaj Gimlio dormis intermite, kaj kiam ajn ili vekiĝis, ili vidis Legolason staranta apude, aŭ marŝanta tien-reen, mallaŭte kantante al si en sia propra lingvo, kaj dum li kantis la blankaj steloj ekaperis sur la malmola nigra volbo supre. Tiel pasis la nokto. Kune ili rigardis la tagiĝon malrapide kreskantan sur la ĉielo, nun nuda kaj sennuba, ĝis finfine okazis la sunleviĝo. Tiu estis pala kaj klara. La vento blovis el la oriento, kaj ĉiuj nebuletoj estis forruliĝintaj; larĝaj terenoj kuŝis ĉirkaŭ ili en la amara lumo.

Antaŭe kaj oriente ili vidis la ventoplenajn altejojn de la Rohana montetaro, kiun ili jam ekvidis antaŭ multaj tagoj de apud la Granda Rivero. Nord-okcidente embuskis la malhela arbarego Fangorno; malproksimaj ankoraŭ dek leŭgojn staris ĝiaj ombrecaj randoj, kaj ĝiaj pli malproksimaj deklivoj forfadis en la distan bluon. Post ĝi ekbriletis tre malproksime,

kvazaŭ flosanta sur griza nubo, la blanka supro de alta Metedraso, la lasta pinto de la Nebulecaj Montoj. El la arbarego fluis renkonte al ili Entvaŝo, ties fluo nun estis rapidega kaj streta, kaj la bordoj profunde fenditaj. La orkaj spuroj turniĝis de la montetaro tiudirekten.

Sekvante per siaj akraj okuloj la vojon al la rivero kaj poste la riveron retro al la arbarego, Aragorno vidis ombron sur la malproksima verdo, malhelan rapidhastan malprecizaĵon. Li ĵetis sin sur la teron kaj denove aŭskultis atente. Sed Legolaso staris apud li, ombrante siajn helajn elfajn okulojn per sia longa gracila mano, kaj li vidis ne ombron, nek malprecizaĵon, sed malgrandajn rajdantajn figurojn, multajn rajdistojn, kaj matena ekbrilo sur iliaj lancopintoj similis ekbrilon de etegaj steloj ekster la rando de mortemula vidivo. Tre fore malantaŭ ili leviĝis malhela fumo je maldensaj bukliĝantaj fadenoj.

Silento regis en la dezertaj kampoj, kaj Gimlio povis aŭdi la aeron moviĝanta inter la herboj.

— Rajdistoj! — kriis Aragorno saltstariĝante. — Multaj rajdistoj sur rapidegaj ĉevaloj alvenas nin!

— Jes, — diris Legolaso, — cent kvin da ili. Flavaj estas ties hararoj, kaj brilaj estas ties lancoj. Ilia ĉefo estas tre alta.

Aragorno ridetis:

— Akravidas l’ okuloj de la elfoj.

— Ne! La rajdistoj malproksimas ne multe pli ol kvin leŭgojn, — diris Legolaso.

— Ĉu kvin leŭgojn aŭ unu, — diris Gimlio, — ni ne povas eskapi de ili en tiu ĉi nuda lando. Ĉu ni atendu ilin ĉi tie aŭ pluiru sur nia vojo?

— Ni atendu, — diris Aragorno. — Mi lacegas, kaj nia ĉaso malsukcesis. Aŭ almenaŭ aliaj devancis nin; ĉar tiuj rajdistoj retrorajdas laŭ la orkaj postsignoj. Eble ni ricevos de ili informojn.

— Aŭ lancojn, — diris Gimlio.

— Tri seloj malplenas, sed hobitojn mi ne vidas, — diris Legolaso.

— Mi ne diris, ke ni ricevos informojn bonajn, — diris Aragorno. — Sed ĉu malbonajn aŭ bonajn, ni ilin atendos ĉi tie.

La tri kunuloj nun lasis la montetosupron, kie ili eble prezentus facilan celon kontraŭ la pala ĉielo, kaj ili marŝis malrapide suben laŭ la norda deklivo. Iom supre de la deklivpiedo ili haltis, kaj volvinte sin per siaj manteloj ili side kunkaŭris sur la senkoloriĝinta herbo. La tempo pasis lante kaj peze. La vento malfortis kaj penetremis. Gimlio estis maltrankvila.

— Kion vi scias pri tiuj rajdistoj, Aragorno, — li diris. — ĉu ni sidas ĉi tie atendante subitan morton?

— Mi foje estis inter ili, — respondis Aragorno. — Ili estas fieraj kaj

obstinaj, sed ili estas lojalaj, pense kaj fare malavaraj; aŭdacaj sed ne kruelaj; saĝaj sed malkleraj, librojn ne verkante, sed kantante multajn kantojn, laŭ maniero de la homidoj antaŭ la Jaroj Malhelaj. Sed mi ne scias, kio okazis ĉi tie lastatempe, nek kia eble estas la animstato de la rohananoj nun inter la perfidulo Sarumano kaj la minaco de Saŭrono. Ili jam delonge estas amikoj de la gondora popolo, kvankam ili ne parencas ilin. Okazis dum la forgesitaj jaroj de la pratempo, ke Eorlo la Juna kondukis ilin el la nordo, kaj ili parencas pli vere al la Bardidoj de Dalo, kaj al la Beornidoj de l' Arbaro, inter kiuj ankoraŭ videblas multaj homoj altaj kaj belaj, kiaj estas la rajdistoj el Rohano. Almenaŭ ili ne amas la orkojn.

— Sed Gandalfo parolis pri onidiro, ke ili pagas tributon al Mordoro, — diris Gimlio.

— Tion mi ne pli ol Boromiro kredas, — respondis Aragorno.

— Vi baldaŭ ekscios la veron, — diris Legolaso. — Jam ili proksimiĝas.

Fine eĉ Gimlio povis aŭdi la lontanan baton de galopantaj hufoj. La rajdistoj, sekvante la postsignojn, turniĝis disde la rivero kaj proksimiĝis la montetojn. Ili rajdis ventrapide.

Nun la krioj de klaraj fortaj voĉoj aŭdiĝis sonore tra la kampoj. Subite ili alimpetis kun tondrosimila bruo, kaj la plej antaŭa rajdisto flankeniris, preterpasante la subon de l' monteto kaj retrogvidante la trupon suden laŭ la okcidentaj orloj de l' montetoj. Sekvante lin ili rajdis: longa linio da armaĵitoj rapidaj, brilaj, minacaj kaj belaspektaj.

Iliaj ĉevaloj grandstaturis, fortaj kaj longkruraj; iliaj grizaj feloj glimis, iliaj longaj vostoj bloviĝis pro la vento, iliaj kolharoj estis plektitaj sur la fieraj nukoj. La viroj rajdantaj ilin tre konvenis al ili: altaj kaj longmembraj; iliaj hararoj, line palaj, ondis sub la malpezaj kaskoj kaj striiĝis malantaŭe je longaj plektaĵoj; iliaj vizaĝoj estis severaj kaj viglaj. En iliaj manoj estis longaj lancoj fraksenlignaj, farbitaj ŝildoj estis dorse pendigitaj, longaj glavoj troviĝis ĉezone, iliaj poluritaj maŝkirasoj pendis ĝis la genuoj.

Po duope ili pretergalopis, kaj malgraŭ tio, ke de tempo al tempo iu el ili stariĝis surpiedinge kaj gvatis antaŭen kaj ambaŭflanken, ili ŝajnis ne rimarki la tri fremdulojn sidantajn silente kaj ilin rigardantajn. La trupo preskaŭ jam pasis, kiam subite Aragorno stariĝis kaj vokis per laŭta voĉo:

— Kiaj informoj el la nordo, rajdistoj el Rohano?

Kun mirigaj rapido kaj lerto ili bremsis siajn ĉevalojn, ronde turniĝis, kaj kurege proksimiĝis. Baldaŭ la tri kunuloj trovis sin en ringo da rajdistoj moviĝantaj en kura cirklo, supren laŭ la deklivo malantaŭ ili kaj malsupren, ĉiam denove ĉirkaŭ ilin kaj ĉiam pli proksimiĝantaj. Aragorno staris silente, kaj la du aliaj sidis senmove, scivolante kiel elturniĝos la afero.

Sen vorto aŭ krio, la rajdistoj subite haltis. Densaĵo da lancoj direktiĝis

al la fremduloj; kaj iuj el la rajdistoj tenis en la mano pafarkojn, kaj la sagoj estis jam noĉitaj al la ŝnuretoj. Poste unu rajdis antaŭen, altulo, pli alta ol la ceteraj; de lia kasko fluis blanka ĉevalvosto kiel kresto. Li antaŭeniris ĝis la pinto de lia lanco preskaŭ tuŝis la bruston de Aragorno. Aragorno ne moviĝis.

— Kiu vi estas, kaj kion vi faras en tiu ĉi lando, — diris la rajdisto, uzante la komunan lingvon de la okcidento, laŭ maniero kaj tono similaj al la parolo de Boromiro, viro el Gondoro.

— Mi nomiĝas Paŝegulo, — respondis Aragorno. — Mi venis el la nordo. Mi ĉasas orkojn.

La rajdisto saltis de sia ĉevalo. Transdoninte sian lancon al aliulo kiu alrajdis kaj elseliĝis apude, li elingigis sian glavon kaj staris vizaĝ-al-vizaĝe kun Aragorno, esplorante lin atente kaj ne senmire. Fine li parolis denove.

— Komence mi supozis vin mem orkoj, — li diris, — sed nun mi vidas, ke tiel ne estas. Efektive vi scias malmulton pri orkoj, se vi ĉasas ilin tiamaniere. Ili estas rapidaj kaj bone armitaj, kaj ili estis multaj. Vi ŝanĝiĝus de ĉasantoj al predoj se vi ĝisatingus ilin. Sed io estas stranga pri vi, Paŝegulo. — Li direktis ree siajn klarajn brilajn okulojn al la disirulo. — Tio ne estas nomo konvena al homo, kiun vi anoncis. Kaj stranga estas ankaŭ via vestaĵo. Ĉu vi elsaltis la herbon? Kiel vi evitis nian vidivon? ĉu vi estas elfpopolaj?

— Ne, — diris Aragorno. — Nur unu el ni estas elfo, Legolaso el la Arbara Regno en malproksima Mornarbaro. Sed ni trapasis Lotlorienon, kaj la donacoj kaj favoro de la Damo akompanas nin.

La rajdisto rigardis ilin kun renovigita miro, sed liaj okuloj malmoliĝis:

— Do troviĝas Damo en la Ora Arbaro, kiel rakontas la malnovaj historioj! — li diris. — Malmultaj evitas ŝiajn retojn, oni diras. Ĉi tagoj strangas! Sed se vi havas ŝian favoron, do eble ankaŭ vi estas retplektantoj kaj sorĉistoj. — Li subite ĵetis fridan rigardon al Legolaso kaj Gimlio. — Kial vi ne parolas, silentuloj? — li demandis.

Gimlio stariĝis kaj firme dismetis siajn piedojn: lia mano premtenis la tenilon de lia hakilo, kaj liaj malhelaj okuloj fajreris.

— Sciigu al mi vian nomon, ĉevalmastro, kaj mi sciigos al vi la mian kaj multon krome, — li diris.

— Rilate al tio, — diris la rajdisto, fiksrigardante de supre la gnomon, — fremdulo devus sin deklari unue. Tamen mi nomiĝas Eomero, filo de Eomundo, kaj mia rango estas la Tria Marŝalo de Rajdmarkio.

— Do, Eomero, filo de Eomundo, Tria Marŝalo de Rajdmarkio, avertu vin la gnomo Gimlio, filo de Gloino, kontraŭ malsaĝaj vortoj. Vi parolas mise pri tio, kio estas bela super la atingopovo de via pensado, kaj povas

senkulpigi vin nur manko de sprito.

La okuloj de Eomero fajris, kaj la viroj el Rohano murmuris kolere kaj proksimiĝis, antaŭenŝovante siajn lancojn.

— Mi fortranĉus vian kapon, inkluzive la barbon, se ĝi troviĝus nur iom pli malproksime de la tero, — diris Eomero.

— Ne sola li staras, — diris Legolaso, kurbigante sian pafarkon kaj almetante sagon per manoj, kiuj moviĝis pli rapide ol la vido. — Vi mortus antaŭ ol la bato trafus.

Eomero levis sian glavon, kaj la afero eble elfalus mise, sed Aragorno saltis inter ilin kaj levis sian manon.

— Pardonpete, Eomero! — li kriis. — Sed kiam vi scios pli, vi komprenos kial vi kolerigis miajn kunulojn. Ni intencas nenion malbonan al Rohano, nek al ties popolo, nek al homoj nek al ĉevaloj. Ĉu vi ne volas aŭdi nian historion antaŭ ol vi batos?

— Mi volas, — diris Eomero, mallevante sian glavon. — Sed vagantoj en Rajdmarkio pli saĝe estu malpli orgojlaj en ĉi duboplenaj tagoj. Unue sciigu al mi vian ĝustan nomon.

— Unue sciigu al mi, kiun vi servas, — diris Aragorno. — Ĉu vi estas amiko aŭ malamiko de Saŭrono, la Malhela Mastro de Mordoro?

— Mi servas nur la Mastron de Markio, Teodenon filon de Tengelo, — respondis Eomero. — Mi ne servas la Potencon de l' malproksima Nigra Lando, tamen ni ankaŭ ne ankoraŭ malkaŝe militas kontraŭ ĝin; kaj se vi fuĝas de ĝi, prefere forlasu tiun ĉi landon. Okazas malordo nun ĉe ĉiuj niaj limoj, kaj ni estas minacataj; sed ni nur deziras esti liberaj kaj vivi kiel ni vivis, retenante la propran kaj servante neniun fremdan mastron, ĉu bonan, ĉu malbonan. Ni bonkore bonvenigis gastojn dum l' epoko pli bona, sed nuntempe la neinvititaj fremduloj trovas nin rapidaj kaj duraj. Ek! Kiu vi estas? Kiun vi servas? Laŭ kies ordono vi ĉasas orkojn en nia lando?

— Mi servas neniun, — diris Aragorno; — sed la servantojn de Saŭrono mi persekutas kien ajn ili iras. Malmultaj inter la mortemuloj scias pli pri orkoj; kaj mi ne persekutas ilin tiel laŭ propra elekto. La orkoj, kiujn ni ĉasis, kaptis du el miaj amikoj. Pro tia neceso homo senĉevala iros piede, kaj li ne petos permeson sekvi la spurojn. Li ankaŭ ne kalkulos la kapojn malamikajn krom per glavo. Mi ne estas senarmila.

Aragorno retroĵetis sian mantelon. La elfa ingo ekbriletis kiam li kaptis ĝin kaj la brila klingo de Andurilo fajris kiel subita flamo kiam li elingigis ĝin.

— Elendilo! — li kriis. — Mi estas Aragorno, filo de Aratorno, kaj oni nomas min Elesaro, la Elfŝtono, Dunadano, heredonto de Isilduro, la filo de Elendilo el Gondoro. Jen la Glavo kiu estis Rompita kaj estas reforĝita! Ĉu

vi helpos aŭ malhelpos min? Elektu rapide!

Gimlio kaj Legolaso rigardis mirigite sian kunulon, ĉar ili neniam antaŭe vidis lin en tia humoro. Li ŝajnis stature kreskinta, dum Eomero ŝrumpis; kaj sur lia viva vizaĝo ili trafis kurtan vizion pri la potenco kaj majesteco de la reĝoj el ŝtono. Momente ŝajnis al la okuloj de Legolaso, ke blanka flamo flagras sur la frunto de Aragorno kvazaŭ brilanta krono.

Eomero retropaŝis kaj sur lia vizaĝo estis mieno imponiĝa. Li mallevis siajn fierajn okulojn.

— Jen efektive estas tagoj strangaj, — li murmuris. — Sonĝoj kaj legendoj ekvivas el la herbo. Diru al mi, mastro, — li diris, — kio venigis vin ĉi tien? Kaj kion signifas la malhelaj vortoj? Jam delonge Boromiro, filo de Denetoro, iris serĉi respondon, kaj la ĉevalo, kiun ni pruntedonis al li, revenis senrajdiste. Kian sorton vi venigas el la nordo?

— La sorton de elekto, — diris Aragorno. — Vi povas diri jenon al Teodeno, filo de Tengelo: malkaŝa milito kuŝas antaŭ li, kun Saŭrono aŭ kontraŭ li. Jam neniuj rajtas vivi kiel ili vivis, kaj malmultaj retenos tion, kion ili nomas propra. Sed pri tiuj gravaj aferoj ni parolos poste. Se hazardo permesos, mi venos mem al la reĝo. Nun mi havas grandan bezonon kaj mi petas helpon aŭ almenaŭ informojn. Vi aŭdis, ke ni persekutas ork-bandon, kiu forportis niajn amikojn. Kion vi povas sciigi al ni?

— Ke ne necesas plu persekuti ilin, — diris Eomero. — La orkoj estas detruitaj.

— Kaj niaj amikoj?

— Ni trovis nur orkojn.

— Sed tio estas vere stranga, — diris Aragorno. — Ĉu vi traserĉis la mortigitojn? Ĉu ne estis kadavroj ne-orkaj? Tiuj estus malgrandaj, laŭ via takso nur infanoj, senŝuaj sed grize vestitaj.

— Troviĝis nek nanoj, nek infanoj, — diris Eomero. — Ni nombris la mortintojn kaj prirabis ilin, kaj poste ni amasigis la kadavrojn kaj bruligis ilin laŭ nia kutimo. La cindroj ankoraŭ fumas.

— Ni ne parolas pri nanoj aŭ infanoj, — diris Gimlio. — Niaj amikoj estis hobitoj.

— Hobitoj? — diris Eomero. — Kaj kio estas ili? Estas stranga nomo.

— Stranga nomo de stranga popolo, — diris Gimlio. — Sed tiuj estas al ni tre karaj. Ŝajnas, ke en Rohano vi aŭdis pri la vortoj, kiuj ĝenis Minason Tirit. Ili parolis pri la duonuloj. Tiuj hobitoj estas duonuloj.

— Ĉu duonuloj! — ridis la rajdisto staranta apud Eomero. — Duonuloj! Sed tiuj estas nur eta popolo en malnovaj kantoj kaj infanaj rakontoj el la nordo. Ĉu ni promenas en legendoj aŭ sur la verda tero en taglumo?

— Eblas fari ambaŭ, — diris Aragorno. — Ĉar ne ni sed la posteuloj

kreos la legendojn pri nia epoko. La verda tero, ĉu vi diras? Tio estas potenca afero legenda, kvankam vi surpaŝas ĝin en la taga lumo!

— La tempo urĝas, — diris la rajdisto, ne atentante Aragornon. — Ni devas rapidi suden, mastro. Ni lasu ĉi sovaĝulojn al iliaj fantaziaĵoj. Aŭ ni ligu ilin kaj konduku ilin al la reĝo.

— Silentu, Eotano! — diris Eomero propralingve. — Lasu nin provizore. Diru al la *eoredo*, ke ĝi aranĝu sin sur la pado, kaj pretiĝu rajdi al la Entvaŝo.

Murmurante Eotano retiriĝis kaj alparolis la aliajn. Baldaŭ ili retroiris kaj lasis Eomeron sola kun la tri kunuloj.

— Ĉio kion vi diras estas stranga, Aragorno, — li diris. — Tamen vi diras la veron, tio estas klara: la homoj de Markio ne mensogas, kaj sekve ne estas facile trompeblaj. Sed ne ĉion vi rakontis. Ĉu vi ne volas nun paroli pli detale pri via komisio, tiel ke mi povu juĝi kion fari?

— Mi ekvojaĝis el Imladriso, kiel oni nomas ĝin en la rimaĵo, antaŭ multaj semajnoj, — respondis Aragorno. — Kun mi iris Boromiro el Minaso Tirit. Mia komisio estis iri al tiu urbo kun la filo de Denetoro por helpi lian popolon en la milito kontraŭ Saŭrono. Sed la Kunularo, kun kiu mi vojaĝis, havis alian aferon. Pri ĝi mi ne povas paroli nun. Gandalfo la Griza estis nia estro.

— Gandalfo! — Eomero ekkriis. — Gandalfo Grizmantelo estas konata en Markio; sed lia nomo, mi avertas vin, ne plu estas pasvorto al la reĝa favoro. Li gastis en la lando multfoje laŭ la homa memoro, veninte laŭvole, post sezono aŭ post multaj jaroj. Li ĉiam heroldas pri strangaj okazaĵoj: Misheroldo, diras nun iuj.

» Efektive depost lia lasta alveno en la somero al ĉiuj aferoj okazis mise. Tiam komenciĝis nia problemo pri Sarumano. Ĝis tiam ni taksis Sarumanon nia amiko, sed Gandalfo venis tiam kaj avertis nin, ke subita milito prepariĝas en Isengardo. Li diris, ke li mem estis enkarcerigita en Ortanko kaj nur malfacile eskapis, kaj li petegis helpon. Sed Teodeno ne volis aŭskulti lin, kaj li foriris. Ne parolu laŭte la nomon Gandalfo al la oreloj de Teodeno! Li koleras. Ĉar Gandalfo prenis la ĉevalon, kiu nomiĝas Ombrofakso, la plej valoran el ĉiuj ĉevaloj de la reĝo, ĉefo de l' *Mearasoj*, kiun rajtas rajdi nur la Mastro de Markio. Ĉar la patro de ilia raso estis la granda ĉevalo de Eorlo, kiu scipovis la lingvon de la homoj. Antaŭ sep noktoj Ombrofakso revenis; sed la reĝa kolero ne malpliiĝis, ĉar la ĉevalo estas nun sovaĝa kaj perraesas al neniu tuŝi ĝin.

— Do Ombrofakso sola trovis sian vojon el malproksima nordo, — diris Aragorno, — ĉar tie disiĝis li kaj Gandalfo. Sed ve! Rajdos Gandalfo ne plu. Li falis en mallumon en la Minejoj de Morio kaj ne plu eliros.

— Tio estas peza informo, — diris Eomero. — Almenaŭ al mi kaj al multaj; kvankam ne al ĉiuj, kiel vi eble konstatos, se vi alvenos la reĝon.

— Ĝi estas informo pli doloriga, ol iu ajn en tiu ĉi lando povas kompreni, kvankam ĝi eble efikos ilin severe antaŭ ol la jaro multe pli aĝiĝos, — diris Aragorno. — Sed kiam falas la grandaj, malpli grandaj devas gvidi. Mia parto estis gvidi nian Kunularon sur la longa vojo el Morio. Tra Lorieno ni venis — pri kio estus bone, ke vi ekkonu la veron antaŭ ol priparoli ĝin denove — kaj de tie laŭ la leŭgoj de la Granda Rivero ĝis la akvofaloj de Raŭroso. Tie Boromiron mortigis tiuj samaj orkoj, kiujn vi detruis.

— Ĉiuj viaj informoj estas veindaj! — ekkriis Eomero konsternite. — Granda domaĝo estas tiu morto al Minaso Tirit, kaj al ni ĉiuj. Tiu estis meritplena viro! Ĉiuj laŭdis lin. Li venis malofte al Markio, ĉar lin ĉiam okupis la militoj ĉe la orientaj landlimoj, sed mi vidis lin. Pli simila al la rapidaj filoj de Eorlo ol al la severaj viroj de Gondoro li ŝajnis al mi, kaj verŝajne montriĝonta kiel grandioza estro de sia popolo en konvena tempo. Sed ni ricevis neniun sciigon el Gondoro pri tiu ĉi doloraĵo. Kiam li falis?

— Jam estas la kvara tago de kiam li estis mortigita, — respondis Aragorno, — kaj ekde la vespero de tiu tago ni vojaĝis el la ombro de Tol Brandiro.

— Ĉu piede? — ekkriis Eomero.

— Jes, precize kiaj vi vidas nin.

Vasta miro envenis la okulojn de Eomero.

— Paŝegulo estas nomo tro povra, filo de Aratorno, — li diris. — Flugpieda mi nomas vin. Tiun faraĵon de la tri amikoj devus oni prikanti en multaj haloj. Kvardek leŭgojn plus kvin vi tramezuris antaŭ fino de la kvara tago! Fortika estas la raso Elendila! Sed nun, mastro, kion vi volas, ke mi faru? Mi devas reiri haste al Teodeno. Mi parolis singarde antaŭ miaj homoj. Estas vere, ke ni ankoraŭ ne militas malkaŝe kontraŭ la Nigra Lando, kaj troviĝas kelkaj, proksimaj al la reĝa orelo, kiuj esprimas poltronajn konsilojn; sed milito venas. Ni ne forlasos nian malnovan aliancon kun Gondoro, kaj dum ili batalos ni helpos ilin: tion diras mi kaj ĉiuj kiuj konsentas kun mi. Orient-markio estas mia komandejo, la respondeco de la Tria Marŝalo, kaj mi forigis tute niajn gregojn kaj paŝtistojn, retirinte ilin trans Entvaŝon kaj lasinte surloke nur gardistojn kaj rapidajn skoltojn.

— Do vi ne pagas tributon al Saŭrono? — diris Gimlio.

— Ni tion ne faras nek iam ajn faris, — diris Eomero kun ekfajro de l' okuloj, — kvankam venis al miaj oreloj, ke tiu mensogo estas disvastigita. Antaŭ kelkaj jaroj la mastro de l' Nigra Lando volis aĉeti de ni ĉevalojn je alta prezo, sed ni tion rifuzis, ĉar la bestojn li misutiligas. Poste li sendis

kaperantajn orkojn, kaj ili forkondukis tiom, kiom ili povis, elektante ĉiam ĉevalojn nigrajn: malmultaj el tiuj jam restas. Tiukiale nia malpaco kun la orkoj estas severa.

» Sed aktuale nin ĉefe koncernas Sarumano. Li pretendis mastrecon de tiu ĉi tuta lando, kaj okazis milito inter ni dum multaj monatoj. Li prenis orkojn por servi lin, kaj luprajdantojn, kaj misajn homojn, kaj li fermis kontraŭ nin la Breĉon, tiel ke ni probable estas atakotaj tiel oriente kiel okcidente.

» Estas malfacile trakti tian malamikon: li estas sorĉisto tiel ruza kiel kaŝiĝe lerta, ĉar li havas multajn aspektojn. Li iras tien-reen, oni diras, kiel maljunulo en kapuĉo kaj mantelo, tre simile al Gandalfo, kiel multaj nun memoras. Liaj spionoj trapasas ĉiujn retojn, kaj liaj birdoj misaŭguraj flugas libere sur la ĉielo. Mi ne scias, kiel ĉio finiĝos kaj mia koro dubemas; ĉar ŝajnas al mi, ke ne ĉiuj liaj amikoj loĝas en Isengardo. Sed se vi venos al la reĝa domo, vi vidos mem. Ĉu vi volas veni? Ĉu mi vane esperas, ke vi estas sendita al mi kiel helponto dum dubo kaj bezono?

— Mi venos, kiam mi povos, — diris Aragorno.

— Venu nun! — diris Eomero. — La Heredonto de Elendilo vere estus forto por la Filoj de Eorlo en tiu ĉi misa sezono. Okazas ĝuste nun batalo ĉe la Okcidentujo, kaj mi timas, ke tio finiĝos malbone por ni.

» Efektive, al tiu ĉi rajdado norden mi iris sen permeso de la reĝo, ĉar dum mia foresto lia domo estas lasita kun malmulte da gardado. Sed skoltoj avertis min antaŭ tri noktoj pri la ork-bando alvenanta el la Orienta Muro, kaj ili raportis, ke kelkaj inter ili portis la blankan insignon de Sarumano. Do suspektante tion, kion mi plej timas, nome ligon inter Ortanko kaj la Nigra Turego, mi forkondukis mian *eoredon*, virojn de mia propra sekvantaro; kaj ni ĝisvenis la orkojn je noktiĝo antaŭ du tagoj, proksime al la limoj de la Entarbaro. Tie ni ĉirkaŭis ilin, kaj ekbatalis hieraŭ je la tagiĝo. Dek kvin el miaj viroj mi perdis kaj dek du ĉevalojn, ve! Ĉar la orkoj estis pli multaj ol ni anticipis. Aliaj aliĝis al ili, veninte el la oriento el trans la Granda Rivero: iliaj spuroj estas klare videblaj iom norde de ĉi loko. Kaj ankaŭ aliaj venis el la arbaro. Grandaj orkoj, kiuj ankaŭ portis la Blankan Manon de Isengardo: tiu speco estas pli forta kaj pli danĝera ol ĉiuj aliaj.

» Malgraŭ tio ni detruis ilin. Sed ni tro longe forestas. Oni bezonas nin sude kaj okcidente. Ĉu vi ne volas veni? Troviĝas aldonaj ĉevaloj, kiel vi vidas. Estas farota laboro por la Glavo. Jes, kaj ni povus utiligi la hakilon de Gimlio kaj la pafarkon de Legolaso, se ili volos pardoni miajn hastajn vortojn pri la Damo de l' Arbaro. Mi nur parolis, kiel parolas ĉiuj homoj en mia lando, kaj mi volonte lernus pli bonan.

— Mi dankas vin pro viaj afablaj vortoj, — diris Aragorno, — kaj mia

koro deziras akompani vin; sed mi ne povas forlasi miajn amikojn, dum restas espero.

— Espero ne restas, — diris Eomero. — Viajn amikojn vi ne trovos ĉe la nordaj limoj.

— Tamen miaj amikoj ne estas malantaŭe. Ni trovis klaran atestaĵon ne malproksime de la Orienta Muro, ke almenaŭ unu el ili ankoraŭ estis tie vivanta. Sed inter la muro kaj la montetoj ni trovis neniun alian postsignon de ili, kaj neniuj spuroj deviis tien aŭ alien, se mia lerto ankoraŭ ne forlasis min.

— Do kio okazis al ili laŭ via opinio?

— Mi ne scias. Eble ili estas murditaj kaj forbruligitaj inter la orkoj; sed vi diris, ke tio ne povas esti, kaj mi ne timas tion. Mi povas nur supozi, ke oni forportis ilin en la arbaron antaŭ la batalo, eble eĉ antaŭ ol vi ringis viajn malamikojn. Ĉu vi povas ĵuri, ke neniu eskapis tiamaniere el via reto?

— Mi pretus ĵuri, ke neniu orko eskapis post kiam ni ekvidis ilin, — diris Eomero. — Ni atingis la arbarorandon antaŭ ili, kaj se post tio iu alia vivanto trabreĉis nian ringon, tiu estis nenia orko kaj posedis ian elfan potencon.

— Niaj amikoj estas vestitaj precize kiel ni, — diris Aragorno; — kaj vi preterpasis nin en plena taglumo.

— Tion mi forgesis, — diris Eomero. — Estas malfacile certi pri io ajn inter tiom da mirindaĵoj. La mondo tute strangiĝis. Elfo kaj gnomo kunule promenas en niaj ĉiutagaj kampoj; kaj oni parolas kun la Damo de l' Arbaro kaj tamen travivas; kaj revenas al milito la Glavo kiu estis rompita dum la longaj epokoj, antaŭ ol la patroj de niaj patroj enrajdis en Markion! Kiel juĝu homo kion fari en tia epoko?

— Kiel li juĝis ĉiam, — diris Aragorno. — Bono kaj miso ne ŝanĝiĝis depost la praepoko; kiel ili ankaŭ ne estas tiaj inter elfoj kaj gnomoj kaj aliaj inter homoj. Estas la devo de homo konstati ilin, tiom en la Ora Arbaro kiom en lia propra domo.

— Ja vere, — diris Eomero. — Sed vin mi ne pridubas, nek la faron kiun mia koro volas fari. Tamen mi ne rajtas libere fari ĉion laŭ mia volo. Kontraŭas nian leĝaron permesi, ke fremduloj vagu laŭvole en nia lando, ĝis la reĝo mem cedas al ili tiun rajton, kaj la ordono pli severas dum ĉi tagoj de danĝero. Mi petegis, ke vi revenu volonte kun mi, kaj tion vi ne volas. Mi malemas komenci batalon de cent kontraŭ tri.

— Mi ne opinias, ke via leĝaro estas kreita por tia hazardo, — diris Aragorno. — Kaj efektive mi ne estas fremdulo; ĉar mi estis en tiu ĉi lando pli frue, pli ol unufoje, kaj rajdis kun la armeo de rohananoj, kvankam kun alia nomo kaj en alia aspekto. Vin mi ne vidis pli frue, ĉar vi estas juna, sed mi kunparolis kun Eomundo, via patro, kaj kun Teodeno filo de Tengelo. Neniam en antaŭa epoko iu ajn alta mastro de tiu ĉi lando devigis homon forlasi serĉon kia la mia. Almenaŭ mia devo estas klara: pluiri. Vidu jam, filo de Eomundo, oni devas finfine elekti. Helpu nin, aŭ plej malbone lasu nin liberaj. Aŭ provu apliki vian leĝon. Se tion vi faros, troviĝos malpli multaj por reiri al via milito aŭ al via reĝo.

Eomero silentis momente, poste li parolis.

— Al ni ambaŭ necesas urĝo, — li diris. — Mia aro jukas foriri, kaj ĉiu horo malpliigas vian esperon. Jen mia elekto. Vi rajtas iri; kaj cetere mi pruntedonos al vi ĉevalojn. Nur tion ĉi mi petas: kiam via serĉo estos plenumita, aŭ pruviĝos vana, revenu kun la ĉevaloj trans Entvaŝon al Meduseldo, la alta dorao en Edoraso, kie Teodeno nun sidas. Tiel vi pruvos al li, ke mi ne misjuĝis. Tiel mi metas min, kaj eble eĉ mian vivon, en la kuratorecon de via fidindeco. Ne neglektu.

— Mi ne neglektos, — diris Aragorno.

Vidiĝis granda miro kaj multaj ombraj kaj dubemaj gvatoj inter la viroj de Eomero, kiam tiu ordonis, ke la kromĉevaloj estu pruntedonitaj al la fremduloj; sed nur Eotano aŭdacis paroli malkaŝe:

— Tio eble konvenas por tiu mastro de la raso el Gondoro, laŭ lia

pretendo, sed kiu aŭdis pri ĉevalo de Markio donita al gnomo?

— Neniu, — diris Gimlio. — Kaj ne ĝenu vin: neniu iam aŭdos pri tio. Mi preferas marŝi ol sursidi la dorson de ajna besto tiom granda, donita ĉu sen, ĉu kun bedaŭro.

— Sed nun vi devos rajdi, aŭ vi malhelpos nin, — diris Aragorno.

— Venu, vi sidos malantaŭ mi, amiko Gimlio, — diris Legolaso. — Tiam ĉio estos en ordo, kaj al vi necesos nek pruntepreni ĉevalon, nek esti ĝenata per ĉevalo.

Oni kondukis al Aragorno grandan malhelgrizan ĉevalon, kaj li surseliĝis.

— Ĝi nomiĝas Hasufelo, — diris Eomero. — Ke ĝi portu vin taŭge kaj al fortuno pli prospere ol spertis Garulfo, ĝia antaŭa mastro.

Ĉevalo pli malgranda kaj malpli peza, sed agitiĝema kaj arda, estis kondukita al Legolaso. Arodo ĝi nomiĝis. Sed Legolaso petis, ke oni forprenu la selon kaj bridon. “Tion mi ne bezonas”, — li diris kaj malpeze sursaltis, kaj je ĉies miro Arodo estis malsovaĝa kaj agopreta sub li, moviĝante tien kaj reen pro nuraj vortoj: tia estis la elfa metodo ĉe ĉiuj bonaj bestoj. Gimlion oni suprenlevis malantaŭ lian amikon, al kiu li kroĉiĝis, apenaŭ pli senĝena ol Sam Vato en boato.

— Adiaŭ, kaj vi trovu kion vi serĉas! — kriis Eomero. — Revenu laŭeble baldaŭ, kaj niaj glavoj poste brilu kune!

— Mi venos, — diris Aragorno.

— Kaj ankaŭ mi venos, — diris Gimlio. — La afero de la Damo Galadriela daŭre kuŝas inter ni. Mi ankoraŭ devos instrui al vi parolojn ĝentilajn.

— Ni vidos, — diris Eomero. — Tiom da strangaĵoj hazardis, ke lerni laŭdon al bela sinjorino sub la amaj frapoj de gnoma hakilo ne ŝajnos granda mirindaĵo. Adiaŭ!

Tion dirinte ili disiĝis. Tre rapidaj estis la ĉevaloj de Rohano. Kiam post kelka tempo Gimlio rigardis reen, la trupo de Eomero estis jam eta kaj malproksima. Aragorno ne rigardis reen: li rigardis la postsignojn dum la rapida antaŭeniro, klinante la kapon apud la kolo de Hasufelo. Post nelonge ili alvenis la bordon de Entvaŝo, kaj tie ili renkontis la aliajn spurojn, pri kiuj Eomero aludis, venantajn suben el la oriento de sur la montaro.

Aragorno elseliĝis kaj esploris la teron, poste saltis denove selen kaj forrajdis iom orienten, restante unuflanke kaj zorgante ne surrajdi la spurojn. Poste li denove elseliĝis kaj esploris la teron, piedirante jen antaŭen jen malantaŭen.

— Malmulto troveblas, — li diris reveninte. — La ĉefaj spuroj estas tute konfuzitaj pro l’ trapaso de la rajdistoj, kiam ili revenis; ilia unua vojo certe

kuŝis pli proksime al la rivero. Sed tiu ĉi vojo orienten estas freŝa kaj klara. Neniu spuro troviĝas tie de piedoj irantaj la kontraŭan direkton, reen al Anduino. Nun ni devos rajdi malpli rapide kaj certiĝi, ke neniuj spuroj devias ambaŭflanke. La orkoj ekde ĉi tie certe konstatis, ke ili estas ĉasataj; ili eble provis iel forigi siajn kaptitojn antaŭ ol oni alvenis ilin.

Dum ili rajdis antaŭen, la tago estis nuboplena. Malaltaj grizaj nuboj venis trans la Montaron. Nebuleto vualis la sunon. Ĉiam pli proksime superombris la arbvestitaj deklivoj de Fangorno, malrapide malheliĝantaj dum la suno iris okcidenten. Ili vidis neniujn spurojn dekstre kaj maldekstre, sed jen kaj jen ili pasis unuopajn orkojn, falhaltigitajn dum la forkuro, kun grizplumaj sagoj eniĝintaj dorse aŭ gorĝe.

Finfine, dum la posttagmezo estis forvelkanta, ili alvenis la randon de la arbarego, kaj en aperta maldensejo ili trovis la lokon de la granda bruligado: la cindroj ankoraŭ varmegis kaj fumis. Apude troviĝis amasego da kaskoj kaj maŝkirasoj, fenditaj ŝildoj kaj rompitaj glavoj, pafarkoj kaj sagoj, kaj aliaj armaĵoj. Sur fosto en la mezo estis muntita granda goblena kapo: sur ties frakasita kasko plu videblis la blanka signo. Pli fore, apud la rivero, kie ĝi elfluis el la arbarorando, troviĝis tumulo. Ĝi estis nove kreita; la kruda tero estis kovrita de freŝe tranĉitaj herbgrunderoj: ĉirkaŭe estis starigitaj dek kvin lancoj.

Aragorno kaj ties kunuloj esploris larĝe ĉirkaŭ la batalkampo, sed la lumo forvelkis kaj la vespero baldaŭ malheliĝis malklara kaj nebuleca. Ĝis noktiĝo ili trovis neniun spuron de Gaja kaj Grinĉjo.

— Ni povas neniom pli, — diris Gimlio triste. — Ni frontis multajn enigmojn de kiam ni venis al Tol Brandiro, sed tiu ĉi estas plej malfacile solvebla. Mi konjektas, ke la bruligitaj ostoj de la hobitoj estas jam miksitaj kun tiuj de la orkoj. Tio estos peza informo por Frodo, se li ĝisvivos aŭdi ĝin; kaj peza ankaŭ por tiu maljuna hobito, kiu atendas en Rivendelo. Elrondo kontraŭis ilian vojaĝon.

— Sed Gandalfo ne, — diris Legolaso.

— Sed Gandalfo elektis mem vojaĝi, kaj li la unua perdiĝis, — respondis Gimlio. — Lia aŭgurado perfidis lin.

— La konsiloj de Gandalfo ne fondiĝis sur antaŭscio pri sekureco, por li aŭ por aliaj, — diris Aragorno. — Ekzistas aferoj prefere komencotaj ol rifuzotaj, eĉ se la finrezulto estas neklara. Sed mi ankoraŭ ne forlasos tiun ĉi lokon. Ĉiuokaze ni devas atendi ĉi tie la mateniĝon.

Iom ekster la batalkampo ili bivakis sub larĝa arbo: tiu aspektis kiel kaŝtanarbo, kaj tamen ĝi plu portis multajn larĝajn brunajn foliojn el antaŭa jaro, kvazaŭ sekaj manoj kun longaj disigitaj fingroj; tiuj klakis morne pro la nokta venteto.

Gimlio ektremis. Ili kunportis nur po unu lankovrilon.

— Ni ĉendu fajron, — li diris. — Mi jam ne zorgas pri la danĝero. La orkoj venu tiel dense kiel someraj tineoj ĉirkaŭ kandelo!

— Se tiuj malfeliĉaj hobitoj disvagas en la arbaro, tio eble logus ilin ĉi tien, — diris Legolaso.

— Kaj ĝi eble logus aliaĵojn, nek orkajn nek hobitajn, — diris Aragorno. — Ni proksimas al la montaj limregionoj de l' perfidulo Sarumano. Cetere ni troviĝas je la eĝo mem de Fangorno, kaj oni diras, ke estas danĝere tuŝi ties arbojn.

— Sed la rohananoj kreis grandan bruladon ĉi tie hieraŭ, — diris Gimlio, — kaj ili faligis arbojn por la fajro, kiel videblas. Tamen ili pasigis poste la nokton ĉi tie sendomaĝe, kiam finiĝis ilia laboro.

— Ili estis multaj, — diris Aragorno, — kaj ilin ne ĝenas la kolero de Fangorno, ĉar ili malofte venas ĉi tien, kaj ili ne iras sub la arbojn. Sed niaj vojoj verŝajne kondukos nin en la arbaron mem. Do gardu vin! Tranĉu neniom da viva ligno!

— Ne necesas, — diris Gimlio. — La rajdistoj postlasis sufiĉe da splitoj kaj branĉoj, kaj morta ligno kuŝas abunde. — Li foriris por kolekti brulaĵon, kaj sin okupis per konstruo kaj ĉendo de fajro; sed Aragorno sidis silenta, dorse apogita per la granda arbo, profunde pensante; kaj Legolaso staris sola en la maldensejo, rigardante la profundan ombron de la arbaro, kliniĝante antaŭen, kiel aŭskultanto al voĉoj defore alvokantaj.

Kiam la gnomo bruligis malgrandan helan fajron, la tri kunuloj proksimiĝis al ĝi kaj sidiĝis kune, kovrante ĝian lumon per siaj kapuĉitaj figuroj. Legolaso suprenrigardis al la branĉoj de la arbo etendiĝantaj super ili.

— Vidu! — li diris. — La arbo estas kontenta pri la fajro!

Eble temis pri tio, ke la dancantaj ombroj trompis iliajn okulojn, sed certe al ĉiu el la kunuloj ŝajnis, ke la branĉoj kurbiĝas tien aŭ alien por alveni supre de la flamoj, dum la superaj branĉoj kliniĝas; la brunaj folioj nun elstaris rigide, kaj kunfrotiĝis kiel multaj malvarmaj sulketaj manoj spertantaj komforton pro la varmo.

Estis silento, ĉar subite la malhela kaj nekonata arbaro, tiel proksima, sentigis sin kiel granda minaca ĉeestaĵo plena de ia sekreta intenco. Post kelka tempo denove parolis Legolaso.

— Celeborno avertis, ke ni ne iru profunden en Fangornon, — li diris. — Ĉu vi scias kial, Aragorno? Kiaj estas la arbaraj fabeloj, pri kiuj Boromiro aŭdis?

— Mi aŭdis multajn rakontojn en Gondoro kaj aliloke, — diris Aragorno, — sed sen la vortoj de Celeborno mi taksus ilin nur fabeloj

kreitaj de la homoj dum velko de vera scio. Mi pensis demandi vin pri la tiuafera aŭtentikeco. Kaj se elfo de l' arbaro ne scias, kiel povu homo respondi?

— Vi pli vojaĝis ol mi, — diris Legolaso. — Mi aŭdis nenion pri ĝi en mia propra lando, krom nur kantoj kiuj rakontas kiel la onodroj, kiujn la homoj nomas entoj, tie loĝis antaŭ longe. Ĉar Fangorno estas malnova, malnova eĉ laŭ elfaj kriterioj.

— Jes, ĝi estas malnova, — diris Aragorno, — tiel malnova kiel la arbaro apud la Dolmenejo, kaj ĝi estas multe pli granda. Elrondo diris, ke la du estas parencaj, la lastaj fortikaĵoj de la potencaj arbaroj de la pratempo, en kiuj vagis la unuenaskitoj, dum la homoj ankoraŭ dormis. Tamen Fangorno tenas ian propran sekreton. Kia ĝi estas, mi ne scias.

— Kaj mi ne volas scii, — diris Gimlio. — Nenio loĝanta en Fangorno estu ĝenata miakonte!

Ili lotumis pri la vaĉoj, kaj la loto de la unua vaĉo falis al Gimlio. La aliaj kuŝiĝis. Preskaŭ tuj dormo envolvis ilin.

— Gimlio! — diris Aragorno dormeme. — Memoru, ke estas danĝere tranĉi branĉon aŭ branĉeton de vivanta arbo en Fangorno. Sed ne vagu tro malproksimen serĉante mortan lignon. Prefere lasu, ke la fajro estingiĝu! Voku min laŭbezone!

Je tio li endormiĝis. Legolaso jam kuŝis senmova, la belaj manoj estis falditaj sur lia brusto, la okuloj nefermitaj, kunfandante vivan nokton kaj profundan sonĝon laŭ la elfa maniero. Gimlio sidis kurbiĝinte apud la fajro, movante sian dikfingron mediteme laŭ la eĝo de sia hakilo. La arbo susuris. Mankis aliaj sonoj.

Subite Gimlio levis la kapon, kaj jen ĝuste rande de la fajrolumo staris kurbiĝinta maljunulo, apogante sin per bastono kaj volvite en vasta mantelo; lia larĝranda ĉapelo estis surtirita ĝis liaj okuloj. Gimlio saltstariĝis, momente tro konsternita por ekkrii, kvankam tuj fulmis en lia menso supozo ke alvenis al ili Sarumano. Aragorno kaj Legolaso, vekitaj per lia subita ekmovo, sidiĝis kaj rigardegis. La maljunulo nek parolis nek signis.

— Nu, oĉjo, kiel ni servu vin? — diris Aragorno, saltstariĝinte. — Venu varmiĝi, se vi fridas! — Li paŝis antaŭen, sed la maljunulo estis jam for. Neniu lia spuro troveblis proksime, kaj ili ne riskemis iri foren. La luno jam subiris, kaj la nokto tre mallumis.

Subite Legolaso ekkriis:

— La ĉevaloj! La ĉevaloj!

La ĉevaloj estis foririntaj. Ili eltrenis siajn ligaĵojn kaj malaperis. Dum kelka tempo la tri kunuloj staris silente kaj senmove, ĉagrenitaj pro tiu nova frapo de misfortuno. Ili estis ĉe la rando de Fangorno, kaj multegaj leŭgoj

kuŝis inter ili kaj la viroj de Rohano, iliaj solaj amikoj en tiu ĉi vasta kaj danĝera lando. Dum ili senmovis, ŝajnis al ili, ke ili aŭdas, malproksime en la nokto, sonon de ĉevaloj henantaj kaj blekantaj. Poste ĉio denove silentiĝis, krom la frida susuro de la vento.

— Nu, ili foriris, — diris Aragorno finfine. — Ni ne povas trovi ilin nek kapti ilin; do se ili ne revenos propravole, necesas ke ni malhavu ilin. Ni ekiris per la piedoj kaj tiujn ni ankoraŭ posedas.

— Piedoj! — diris Gimlio. — Sed ni ne povos manĝi ilin, same kiel marŝi per ili. — Li ĵetis iom da brulaĵo sur la fajron kaj ekkaŭris apude.

— Antaŭ nur kelkaj horoj vi ne volis sidi sur ĉevalo de Rohano, — ridis Legolaso. — Iam vi iĝos rajdemulo.

— Neverŝajnas, ke mi havos la okazon, — diris Gimlio.

— Se vi volas scii mian penson, — li rekomencis post kelka tempo, — mi opinias, ke tiu estis Sarumano. Kiu alia? Memoru la vortojn de Eomero: “Li iras tien-reen kiel maljunulo en kapuĉo kaj mantelo”. Per tiuj vortoj. Li foriris kun niaj ĉevaloj aŭ fortimigis ilin, kaj jen ni estas. Venos al ni pli da problemoj, atentu miajn vortojn!

— Mi atentas ilin, — diris Aragorno. — Sed mi rimarkis ankaŭ, ke tiu maljunulo surhavis ĉapelon anstataŭ kapuĉo. Tamen mi ne dubas, ke vi konjektas prave, kaj ĉi tie ni estas en danĝero, ĉu nokte ĉu tage. Sed dume nenio alia fareblas ol ripozi, dum tio eblas. Nun vaĉos mi dum iom da tempo, Gimlio. Mi bezonas pli mediton ol dormon.

La nokto pasis malrapide. Legolaso sekvis Aragornon, kaj Gimlio sekvis Legolason, kaj iliaj vaĉoj trenpasis. Sed okazis nenio. Ne reaperis la maljunulo, kaj la ĉevaloj ne revenis.

3

La Uruk-Hajoj

Grinĉjo kuŝis en malhela maltrankvila sonĝo: ŝajnis, ke li aŭdas la propran voĉeton reeĥanta en nigraj tuneloj, vokantan: “Frodo, Frodo!” Sed anstataŭ Frodo centoj da hidaj orkaj vizaĝoj rikanis al li el la ombroj, centoj da hidaj brakoj kroĉiĝis al li ĉiuflanke. Kie estis Gaja?

Li vekiĝis. Malvarma aero blovis al lia vizaĝo. Li kuŝis surdorse. Vespero proksimiĝis, kaj la ĉielo supre malheliĝis. Li turnis sin kaj konstatis, ke la sonĝo estis apenaŭ pli malagrabla ol la vekiĝo. Liaj pojnoj, kruroj kaj maleoloj estis ŝnure ligitaj. Apude kuŝis Gaja, blankvizaĝa, kun malpura ĉifono volvita sur la frunto. Ĉie ĉirkaŭ ili sidis aŭ staris multnombra bando da orkoj.

Malrapide en la dolora kapo de Grinĉjo memoroj kunplektiĝis kaj disiĝis de l’ sonĝ-ombroj. Kompreneble: li kaj Gaja estis forkurintaj en la arbaron. Kio influis ilin? Kial ili forkuris tiel, malatentante oldan Paŝegulon? Ili kuris grandan distancon kriante — li ne povis memori kiomdistance nek kiomtempe; kaj jen subite ili karambolis ĝuste kun grupo da orkoj: tiuj staris aŭskultante, kaj verŝajne ili ne vidis Gajan kaj Grinĉjon ĝis tiuj preskaŭ trafis en iliajn brakojn. Tiam ili kriegis, kaj dekoj da aliaj goblenoj saltis el la arboj. Gaja kaj li elingigis siajn glavojn, sed la orkoj ne volis batali, kaj nur provis kapti ilin, eĉ kiam Gaja jam fortranĉis plurajn brakojn kaj manojn. Brave, Gaja!

Poste Boromiro venis saltante inter la arboj. Li devigis ilin batali. Li mortigis multajn el ili, kaj la cetero fuĝis. Sed ili ne longe reiris, kiam ilin denove atakis minimume cent orkoj, kelkaj tre grandaj, kaj tiuj pafis hajlon da sagoj: ĉiam kontraŭ Boromiron. Boromiro blovis sian kornegon, ĝis la arbaro sonoris, kaj komence la orkoj estis maltrankvilaj kaj retiriĝis; sed kiam ne aŭdiĝis la respondo krom la eĥoj, ili atakis pli sovaĝe ol antaŭe. Grinĉjo ne memoris multon pli. Lia lasta memoro estis Boromiro sin apoganta al arbo, elplukanta sagon; poste subite mallumiĝis.

“Supozeble oni batis mian kapon, — li diris al si. — Mi scivolas, ĉu Gaja estas grave vundita. Kio okazis al Boromiro? Kial la orkoj ne mortigis nin? Kie ni estas, kaj kien ni iras?”

Li ne povis respondi la demandojn. Li sentis sin maljuna kaj malsana. “Mi volas, ke Gandalfo neniam persvadus Elrondon permesi nian partoprenon, — li pensis. — Kion mi kontribuis? Nura ĝeno: pasaĝero, peco

da pakaĵo. Kaj nun mi estas rabaĵo kaj mi estas nura peco da pakaĵo por la orkoj. Mi esperas, ke Paŝegulo aŭ iu venos postuli nin! Sed ĉu mi devus tion esperi? ĉu tio ne misgvidus la planojn? Se nur mi povus liberiĝi!”

Li baraktis iomete, tute senutile. Unu el la orkoj apude sidantaj ekridis kaj diris ion per sia abomeninda lingvo al kunulo.

— Ripozu dum vi povas, stultuleto! — li poste diris al Grinĉjo per la Komuna Lingvo, kiun li preskaŭ tiom hidigis, kiom lia propra lingvo. — Ripozu dum vi povas! Ni trovos uzon por viaj kruroj postnelonge. Vi volos, ke vi neniom havus antaŭ ol ni alhejmigos vin.

— Se estus mia elekto, vi jam nun volus vin morta, — diris la alia. — Mi kvikigus vin, mizera rato. — Li kliniĝis super Grinĉjon, proksimigante al ties vizaĝo siajn flavajn dentaĉojn. En la mano li havis nigran tranĉilon kun longa noĉita klingo. — Kuŝu kviete, aŭ mi tiklos vin per tio ĉi, — li siblis. — Ne tiru al vi atenton, aŭ mi eble forgesos miajn ordonojn. Malbenon al la isengarduloj! *Uglúk u bagronk ŝa puŝdug Saruman-glob búbhoŝ skaj*: — li transiris al longa kolera parolado en la propra lingvo, kiu malrapide forfadis al murmurado kaj graŭlado.

Terurite Grinĉjo senmoviĝis, kvankam plifortiĝis doloro ĉe liaj pojnoj kaj maleoloj, kaj la subaj ŝtonoj boris lian dorson. Por forgesi pri si li aŭskultis silente ĉion, kion li povis aŭdi. Ĉirkaŭe aŭdiĝis multaj voĉoj, kaj kvankam la orka lingvo ĉiam sonis plena de malamo kaj kolero, ŝajnis evidente, ke io kverelsimila jam komenciĝis kaj pliardiĝis.

Grinĉjo trovis surprizite, ke multo el la paroloj estis komprenebla: multaj orkoj uzis la komunan lingvon. Evidente ĉeestis anoj el du aŭ tri malsamaj triboj, kaj ili ne komprenis la orkan lingvon unu de la aliaj. Okazis kolera debato pri la tuja farotaĵo: la irota vojo kaj kion fari pri la kaptitoj.

— Mankas tempo por mortigi ilin ĝuste, — diris unu. — Mankas ludotempo dum tiu ĉi vojaĝo.

— Tio ne eviteblas, — diris alia. — Sed kial ne mortigi ilin rapide, mortigi ilin jam nun? Ili estas malbeninda ĝeno, kaj al ni urĝas. Proksimiĝas vespero, kaj ni devus ekhasti.

— Ordonoj, — diris tria voĉo per profunda graŭlo. — “Mortigu ĉiujn, sed NE la duonulojn: ili estas alportendaj VIVANTAJ laŭeble baldaŭ”. Jen miaj ordonoj.

— Por kio oni deziras ilin? — demandis pluraj voĉoj. — Kial vivantaj? Ĉu ili provizas bonan amuzon?

— Ne! Mi aŭdis, ke unu el ili posedas ion, ion necesan por la milito, iun elfan kompleton aŭ alian. Ĉiuokaze ili ĉiuj estos pridemanditaj.

— Ĉu nur tion vi scias? Kial ni ne priserĉu ilin kaj malkovru? Ni eble

trovus ion de ni mem uzindan.

— Tio estas komento tre interesa, — rikanis voĉo, malpli laŭta ol la aliaj, sed pli malvirta. — Mi eble devos raporti tion. La kaptitoj estas NE priserĉotaj, nek prirabotaj: jen *miaj* ordonoj.

— Ankaŭ la miaj, — diris la profunda voĉo. — "Vivantaj kaj kiel kaptitaj; neniom da priŝtelado". Jen miaj ordonoj.

— Ne niaj ordonoj! — diris unu el la pli fruaj voĉoj. — Ni venis ĉi longan vojaĝon el la Minejoj por mortigi, kaj venĝi niajn popolanojn. Mi volas mortigi kaj poste reiri norden.

— Do vi devas repensi la volon, — diris la graŭla voĉo. — Mi estas Ugluko. Mi estras. Mi reiras al Isengardo laŭ la plej mallonga vojo.

— Ĉu Sarumano estas la mastro aŭ la Granda Okulo? — diris la malvirta voĉo. — Ni devus reiri tuj al Lugburzo.

— Se ni povus transiri la Grandan Riveron, tio eblus, — diris alia voĉo. — Sed ni ne estas sufiĉe multaj por riski subeniron al la pontoj.

— Mi venis transen, — diris la malvirta voĉo. — Flugilhava nazgulo atendas nin norde sur la orienta bordo.

— Eble, eble! Poste vi forflugos kun niaj kaptitoj kaj ricevos la tutajn monkompenson kaj laŭdojn en Lugburzo, kaj lasos nin piediri laŭhazarde tra la Ceval-lando. Ne, ni devas resti kune. Ĉi lokoj estas danĝeraj: plenaj je fiaj ribelantoj kaj kaperistoj.

— Ja, ni devas resti kune, — graŭlis Ugluko. — Mi ne fidas al vi, etaj porkaĉoj. Mankas al vi medolo ekster la propraj stinkejoj. Sen ni vi ĉiuj estus forkurintaj. Ni estas batalemaj uruk-hajoj! Ni mortigis la grandan militestron. Ni kaptis la kaptitojn. Ni estas la servistoj de Sarumano la Saĝa, la Blanka Mano: tiu Mano, kiu provizas al ni por manĝi homkarnon. Ni venis el Isengardo kaj gvidis vin ĉi tien, kaj ni regvidos vin laŭ vojo de ni elektita. Mi estas Ugluko. Mi diris.

— Vi diris pli ol sufiĉe, Ugluko, — rikanis la malvirta voĉo. — Mi scivolas kiel tio impresus ilin en Lugburzo. Eble ili konkludus, ke la ŝultroj de Ugluko bezonas malŝarĝiĝon je kapo ŝvelinta. Oni eble demandus, de kie venis liaj strangaj ideoj. Ĉu ili eble venis de Sarumano? Kiu *li* supozas sin, memstariĝante kun siaj makulitaj blankaj insignoj? Ili eble konsentus kun mi, kun Griŝnaĥo, ilia fidata komisiito. Kaj mi, Griŝnaĥo, diras jenon: Sarumano estas stultulo, kaj stultulo fie perfidema. Sed la Granda Okulo gvatas lin. "Porkaĉoj", ĉu vere? Kiel plaĉas al vi nomiĝi "porkaĉoj" per la fekrastuloj de makulita sorĉisteto? Orkan karnon manĝas ili, mi garantias.

Multaj kriegoj en orka lingvo respondis, kaj la sonora siblego de elingigataj armiloj. Singarde Grinĉjo ĉirkaŭruliĝis, esperante vidi la okazontaĵon. Liaj gardintoj iris partopreni la lukton. En la krepusko li vidis

grandan nigran orkon, verŝajne Uglukon, staranta fronte al Griŝnaĥo, mallonga kurbkrura kreaĵo, tre larĝa kaj havanta longajn brakojn, kiuj pendis preskaŭ ĝis la tero. Ĉirkaŭ ili estis multaj goblenoj pli malgrandaj. Grinĉjo supozis ilin tiuj el la nordo. Ili havis elingigitajn tranĉilojn kaj glavojn, sed hezitis ataki Uglukon.

Ugluko kriis, kaj nombro de aliaj orkoj, preskaŭ same grandaj kiel li, alkuris. Tiam subite, senaverte, Ugluko saltis antaŭen kaj per du rapidaj batoj fortranĉis la kapojn de du el siaj kontraŭuloj. Griŝnaĥo paŝis flanken kaj malaperis en la ombrojn.

La aliaj cedis, kaj unu paŝis malantaŭen kaj sakre stumblofalis pro la kuŝanta korpo de Gaja. Tamen tio verŝajne savis lian vivon, ĉar la kunuloj de Ugluko transsaltis lin kaj distranĉis alian per siaj larĝklingaj glavoj. Tiu estis la flavdentaĉa gardinto. Lia korpo falis rekte sur Grinĉjon ankoraŭ tenante la longan noĉklingan tranĉilon.

— Eningigu la armilojn! — kriis Ugluko. — Kaj neniom pli da idiotaĵo! Ni iros rekte okcidenten de ĉi tie kaj suben laŭ la ŝtuparo. De tie rekte al la montetoj, poste laŭlonge de la rivero ĝis la arbaro. Kaj ni marŝos tage kaj nokte. Ĉu klare?

“Nu, — pensis Grinĉjo, — se nur tiu malbelulo bezonos iom da tempo por ekregi sian trupon, mi havas eblecon”, — venis al li ekbrilo da espero. Eĝo de la nigra tranĉilo tranĉetis lian brakon, poste glisis ĝis lia pojno. Li konsciis pri flueto de sango sur sia mano, sed li ankaŭ sentis fridan tuŝon de ŝtalo sur sia haŭto.

La orkoj pretiĝis marŝi denove, sed iuj el la norduloj estis daŭre malemaj, kaj la isengardanoj mortigis ankoraŭ du antaŭ ol la ceteraj estis timigitaj. Okazis multe da sakrado kaj konfuziĝo. Provizore Grinĉjo estis negardata. Liaj kruroj estis firme ligitaj, kaj liaj manoj kunligitaj pojne estis antaŭ li. Li povis movi ilin samtempe, kvankam la ligaĵo estis kruele strikta. Li flanken puŝis la mortintan orkon, poste apenaŭ riskante spiri li frotis la nodon de l’ pojnligaĵo supren-suben laŭlonge de la tranĉila klingo. Tiu estis akra, kaj la mano de l’ mortinto tenis ĝin rigida. La ŝnuro estis tranĉita! Rapide Grinĉjo tenis ĝin per siaj fingroj kaj nodis ĝin denove kiel malstriktan brakringon el du maŝoj kaj pasigis ĝin trans la manojn. Poste li kuŝis tre senmove.

— Levu tiujn kaptitojn! — kriis Ugluko. — Ne faru trukojn per ili! Se ili ne estos vivaj, kiam ni venos hejmen, mortos ankaŭ iu alia.

Orko kaptis Grinĉjon kvazaŭ sakon, metis sian kapon inter la ligitajn manojn kaj trenis ilin suben, ĝis la vizaĝo de Grinĉjo estis premegita al la orka nuko; poste la orko skue ekmarŝis. Alia simile traktis Gajan. La grifeca mano de la orko kroĉiĝis kiel fero al la brakoj de Grinĉjo; la ungoj pikegis

lin. Li fermis siajn okulojn kaj reglisis en sonĝojn turmentajn.

Subite li estis denove ĵetita al ŝtona planko. Estis frue en la nokto, sed la korna luno jam descendis okcidenten. Ili troviĝis rande de klifo, kiu ŝajnis elrigardi al maro da pala nebuleto. Aŭdiĝis en la proksimo sono de falanta akvo.

— Finfine la skoltoj revenis, — diris proksima orko.

— Nu, kion vi eltrovis? — graŭlis la voĉo de Ugluko.

— Nur unu rajdanton, kaj li fuĝis okcidenten. La vojo estas senobstakla nun.

— Nun, tre povas esti. Sed kiom longe? Idiotoj! Vi devis mortpafi lin. Li alarmos. La damnindaj ĉevalbredantoj aŭdos pri ni antaŭ la mateno. Jam ni devos vojaĝi duoble rapide.

Ombro kliniĝis super Grinĉjo. Tiu estis Ugluko.

— Sidiĝu! — diris la orko. — Miaj knaboj tediĝas portaĉi vin. Necesas, ke ni subengrimpu, kaj vi devos utiligi la krurojn. Estu kunlaborema nun. Nenia kriado, nenia provo eskapi. Ni scias kompensi trukojn laŭ maniero malagrabla, kvankam tio ne lezos vian valoron por la Mastro.

Li tranĉis la ŝnurojn ĉirkaŭ la kruroj kaj maleoloj de Grinĉjo, levis lin per lia hararo kaj starigis lin surpieden. Grinĉjo falis kaj Ugluko ree levstarigis lin per la haroj. Pluraj orkoj ridis. Ugluko premis flakonon inter liajn dentojn kaj verŝis en lian gorĝon iom da bruna likvaĵo: li sentis transflui lin varmegan sovaĝan ardon. Malaperis la doloroj en liaj kruroj kaj maleoloj. Li povis stari.

— Nun la alian! — diris Ugluko. Grinĉjo vidis, ke li iris al Gaja, kiu kuŝis proksime, kaj piedbatis lin. Gaja ĝemis. Kaptante lin malmilde Ugluko trenis lin al sidpozicio kaj deŝiris la bandaĝon de lia kapo. Poste li ŝmiris la vundon per ia malhela ungvento el ligna skatoleto. Gaja elpuŝis krion kaj energie baraktis.

La orkoj manklakis kaj kriaĉis.

— Ne akceptas sian kuracilon, — ili mokis. — Ne scias, kio estas bona al li. Aj! Poste ni ĝuos amuzaĵojn.

Sed tiumomente Ugluko ne okupiĝis pri amuzaĵoj. Necesis rapidi kaj pacigi la maleman sekvantaron. Li kuracis Gajan orkmaniere; kaj la rimedo efikis rapide. Kiam li trudis trinkaĵon el sia flakono en la gorĝon de l' hobito, tranĉis la krurŝnurojn kaj trenlevis lin, Gaja stariĝis, aspekte pala sed seriozmiena, defia kaj ege vigla. La surfrunta vundo jam ne ĝenis lin, sed li havis brunan cikatron ĝis la vivofino.

— Saluton, Grinĉjo! — li diris. — Do ankaŭ vi partoprenas tiun etan ekspedicion, ĉu? Kie ni dormos-matenmanĝos?

— Atentu! — diris Ugluko. — Tio manku! Ligu la langojn. Neniom da

interparolo. Malhelpoj estos raportitaj ĉe la celo, kaj Li scios, kiel rekompenci vin. Vi ja ricevos dormon-matenmanĝon: pli ol vi povos gluti.

La orka bando komencis malsupreniri laŭ streta ravino kondukanta ĝis la suba nebuleta ebenaĵo. Gaja kaj Grinĉjo, disigitaj de dek orkoj aŭ pli, subengrimpis kune. Ĉe la fundo ili surpaŝis herbon, kaj la koroj de la hobitoj plikuraĝiĝis.

— Jam rekte antaŭen! — kriis Ugluko. — Okcidenten kaj iomete norden. Sekvu Lugduŝon.

— Sed kion ni faros je tagiĝo? — diris iuj el la nordanoj.

— Daŭrigi la kuradon, — diris Ugluko. — Kion vi supozas? Ĉu sidi surherbe kaj atendi ĝis la blankhaŭtuloj aliĝos al la pikniko?

— Sed ni ne povas kuri en la sunlumo.

— Vi kuros kun mi malantaŭe, — diris Ugluko. — Kuros! Aŭ vi neniam plu revidos viajn amatajn loĝtruojn. Je la Blanka Mano! Kiom utilas sendi por vojaĝo montajn larvojn, nur duone trejnitajn. Kuru, damninduloj! Kuru dum la nokto daŭras!

Tiam la tuta grupo komencis kuri per la longaj saltaj paŝegoj de orkoj. Ili observis nenian ordon, puŝante, ŝovante kaj sakrante; tamen ilia rapido estis tre granda. Ĉiun hobiton gardis triopo. Grinĉjo troviĝis tre malantaŭe en la spaliro. Li scivolis kiom longe li kapablos progresi tiapaŝe: manĝaĵon li ne havis depost la mateno. Unu el liaj gardantoj havis vipon. Sed aktuale la orka likvoro ankoraŭ ardis en li. Ankaŭ lia cerbo estis vigla.

De tempo al tempo venis al lia menso vizio pri la entuziasrna vizaĝo de Paŝegulo kliniĝanta al malhela postsignaro kaj kuranta, kuranta malantaŭe. Sed kion povus vidi eĉ disirulo krom konfuzitaj spuroj de orkaj piedoj? Liaj propraj spuretoj kaj tiuj de Gaja estis forigitaj per la tramplado de la ferplandaj ŝuoj antaŭ ili kaj malantaŭ ili kaj ĉirkaŭ ili.

Ili progresis nur proksimume unu mejlon for de la klifo, kiam la tereno deklivis suben al larĝa malprofunda konkavejo, kie la grundo molis kaj malsekis. Tie kuŝis nebuleto pale ekluma sub la lastaj radioj de la koma luno. La malhelaj figuroj de la orkoj antaŭe malklariĝis kaj poste estis englutitaj.

— Aj! Estu singardaj! — kriis Ugluko de malantaŭe.

Subita penso alsaltis al Grinĉjo en la menson, kaj li tuj ekagis. Li deviis dekstren kaj plonĝis el atingo de sia kroĉiĝema gardanto, celante kapantaŭen en la nebuleton; li alteriĝis sur la herbon diskuŝe.

— Haltu! — kriegis Ugluko.

Sekvis momenta malordo kaj konfuziĝo. Grinĉjo saltleviĝis kaj ekkuris. Sed la orkoj persekutis lin. Iuj subite abruptis rekte antaŭ li.

“Ne espereblas eskapo! — pensis Grinĉjo. — Sed espereblas, ke mi lasis

kelkajn proprajn signojn netuŝitaj sur la malseka tero”. Li palpis ĉe la kolo per siaj du ligitaj manoj, kaj malkroĉis la broĉon de sia mantelo. Ĝuste kiam kaptis lin longaj brakoj kaj duraj krifoj li lasis ĝin fali. “Tie ĝi kuŝos supozeble ĝis la fino de tempo, — li pensis. — Mi ne scias kial mi faris tion. Se eskapis la aliaj, ili verŝajne iris ĉiuj kun Frodo”.

Vipo volviĝis ĉirkaŭ liaj kruroj kaj li subpremis krion.

— Sufiĉe! — kriis Ugluko alkurante. — Li ankoraŭ devos kuri longan vojon. Kurigu ilin ambaŭ! Uzu la vipon nur kiel memorigilon.

— Sed tio ne finiĝas, — li minacis, sin turninte al Grinĉjo. — Mi ne forgesos. Pago estas nur prokrastita. Ek al.

Nek Grinĉjo nek Gaja multe memoris pri la posta parto de l’ vojaĝo. Misaj sonĝoj kaj misaj vekiĝoj kunfandiĝis en longa mizertunelo, kun espero ĉiam pli velkanta malantaŭe. Ili kuris, kuradis, klopodante atingi la rapidecon starigitan de l’ orkoj, frapite de tempo al tempo per kruela vipŝnuro ruze manipulita. Kiam ili haltis aŭ stumblis, oni kaptis kaj trenis ilin kelkan distancon.

La varmo de la orka trinkaĵo jam malaperis. Grinĉjo denove sentis sin malvarma kaj vomema. Subite li falis vizaĝaltere. Duraj manoj kun ŝirantaj ungegoj alkroĉiĝis kaj levis lin. Li estis portata denove kvazaŭ sako, kaj mallumo ekestis: ĉu mallumo de alia nokto aŭ blindeco de la okuloj, li ne povis scii.

Malklare li ekkonstatis pri voĉoj bruegantaj: ŝajne multaj orkoj postulis halton. Ugluko kriegis. Li sentis sin teren ĵetita, kaj li kuŝis ĝis nigraj sonĝoj envolvis lin. Sed ne longe li eskapis el doloroj; baldaŭ la fera kroĉiĝo de senkompataj manoj trafis lin denove. Dum longa tempo li estis frapetita kaj skuita, kaj poste la mallumo malrapide cedis kaj li revenis al la vekiĝanta mondo kaj konstatis, ke estas matene. Ordonoj estis kriataj, kaj li estis krude ĵetita sur la herbon.

Tie li kuŝis kelkan tempon luktante kontraŭ malespero. Lia kapo turniĝis, sed pro la ardo en la korpo li divenis, ke oni havigis al li plian glutaĵon. Orko kliniĝis super li kaj ĵetis al li iom da pano kaj strion da nekuirita sekigita karno. Li avide manĝis la malfreŝan grizan panon, sed ne la viandon. Li estis malsatega, sed ankoraŭ ne tiom malsatega, ke li manĝus viandon ĵetitan al li de orko, karnon de estaĵo kies naturon li ne volis konjekti.

Li sidiĝis kaj ĉirkaŭrigardis. Gaja troviĝis proksime. Ili estis ĉe la bordo de rapidega mallarĝa rivero. Antaŭe baŭmis montoj: iu alta pinto ricevis la unuajn radiojn de la suno. Ombra makulo da arbarego kuŝis antaŭ ili sur la subaj deklivoj.

Okazis multe da kriado kaj debatado inter la orkoj; kverelo ŝajnis

denove komenciĝonta inter la nordanoj kaj la isengardanoj. Iuj indikis retroen al la sudo kaj iuj indikis orienten.

— Nu, bone, — diris Ugluko. — Lasu ilin al mi do! Nenia mortigado, kiel mi diris al vi pli frue; sed se volas forĵeti ĉion, kion ni venis la tutan vojon akiri, forĵetu ĝin! Mi prizorgos tion, la batalemaj uruk-hajoj faru la laboron kiel kutime. Se vi timas la blankhaŭtulojn, kuru! Kuru! Jen la arbarego, — li diris, indikante antaŭen. — Atingu ĝin! Tio estas la plej favora ebleco. Iru jam! Kaj rapide, antaŭ ol mi forbatos ankoraŭ kelkajn kapojn por iom saĝigi la ceterajn.

Okazis iom da sakrado kaj interpuŝiĝo kaj poste plimulto el la nordanoj forŝiriĝis kaj forkuris, pli ol cento da ili, kurante malorde laŭ la riverbordo al la montoj. La hobitoj postrestis kun la isengardanoj: malhela minaca trupo, minimume okdeko da grandaj malpalaj oblikv-okulaj orkoj kun grandaj arkpafiloj kaj mallongaj larĝklingaj glavoj. Kelkaj el la pli grandaj kaj pli kuraĝaj nordanoj restis kun ili.

— Nun ni traktos pri Grišnaĥo, — diris Ugluko; sed eĉ kelkaj el liaj propraj sekvantoj rigardis maltrankvile suden.

— Mi scias, — graŭlis Ugluko. — La damnindaj ĉevalknaboj konstatis pri ni. Pri tio tute kulpas vi, Snago. Oni devus fortranĉi al vi kaj al la aliaj skoltoj la orelojn. Sed ni estas batalistoj. Ni jam festmanĝos ĉevalkarnon, aŭ ion pli bonan.

Tiam Grinĉjo vidis, kial kelkaj trupanoj indikis orienten. De tiu direkto nun venis raŭkaj krioj, kaj jen estis denove Grišnaĥo, kaj dorse de li kvardeko da similuloj: longbrakaj kurbakruraj orkoj. Sur iliaj ŝildoj estis pentrita po ruĝa okulo. Ugluko antaŭen paŝis renkonte al ili:

— Do vi revenis? — li diris. — Repensis la aferon, ĉu?

— Mi revenis por certigi, ke la ordonoj estu plenumitaj kaj la kaptitoj estu sekuraj, — respondis Grišnaĥo.

— Ĉu vere! Malŝparo de energio. Mi certigos, ke la ordonoj estu plenumitaj sub mia komando. Kaj por kio cetera vi revenis? Vi haste foriris. Ĉu vi ion postlasis?

— Mi postlasis stultulon, — grincvoĉis Grišnaĥo. — Sed akompanis lin kelkaj bravuloj tro valoraj por perdi. Mi sciis, ke vi gvidos ilin en fatrason. Mi venis por helpi ilin.

— Bonege! — ridis Ugluko. — Sed krom se vi havas medolon por batali, vi elektis malĝustan vojon. Lugburzen estis prefere via celo. Venas la blankhaŭtuloj. Kio okazis al via trezora nazgulo? Ĉu oni mortpafis sub li alian rajdbeston? Vidu, se vi kunportus lin, tio eble estus utila — se tiuj nazguloj estas tiaj, kiaj oni pretendas.

— *Nazgulo, nazgulo*, — diris Grišnaĥo, tremetante kaj lekante siajn

lipojn, kvazaŭ tiu vorto posedus fetoran guston, kiun li gustumas senplezure. — Vi priparolas tion, kio estas profunda ekster atingo de viaj kotecaj sonĝoj, Ugluko. *Nazguloj*! Ha! Tiaj, kiaj oni pretendas! Venos tago, kiam vi volos, ke tion vi ne diris. Simio! — li grincvoĉis atakeme. — Vi devus scii, ke ili estas la pupiloj de l' Granda Okulo. Sed ankoraŭ ne la flugilhavaj nazguloj: ankoraŭ ne, ankoraŭ ne. Li ankoraŭ ne volas permesi, ke ili montru sin vivaj trans la Granda Rivero, ne tro baldaŭ. Ili estas por la Milito — kaj aliaj celoj.

— Vi ŝajnas bone informita, — diris Ugluko. — Pli ol konvenas al vi, mi konjektas. Eble tiuj en Lugburzo interesiĝos pri la kielo kaj kialo. Sed dume la uruk-hajoj el Isengardo rajtas kiel kutime fari la taskaĉojn. Ne staru tie bavante! Kunordigu vian kanajlaron! La aliaj porkaĉoj forkuras al la arbarego. Prefere vi sekvu. Vi ne reatingus vivaj la Grandan Riveron. Jam komencu! Tuj! Mi estos ĉekalkane.

La isengardanoj denove kaptis Gajan kaj Grinĉjon kaj pendigis ilin ĉedorse. Poste la trupo ekiris. Horon post horo ili kuradis, paŭzante de tempo al tempo por ĵeti la hobitojn al aliaj portantoj. Ĉu pro tio, ke ili estis pli rapidaj kaj pli fortikaj, ĉu pro iu alia plano de Grišnaĥo, la isengardanoj iom post iom trapasis la orkojn el Mordoro, kaj la trupanoj de Grišnaĥo kunamasiĝis malantaŭe. Baldaŭ ili pliproksimiĝis al la antaŭaj nordanoj. La arbarego komencis malforiĝi.

Grinĉjo estis kontuzita kaj gratita, lian doloran kapon rastis la malpuraĉa nuko kaj haroza orelo de la orko lin tenanta. Tuj antaŭe estis kurbigitaj dorsoj kaj fortikaj dikaj kruroj moviĝantaj supren-suben, supren-suben senripoze, kvazaŭ ili estus konstruitaj el dratoj kaj kornaĵoj, eltaktantaj la koŝmarajn sekundojn de senfina tempo.

Posttagmeze la trupo de Ugluko atingis la nordanojn. Tiuj ekvelkis sub la radioj de l' hela suno, kvankam vintra suno brilanta en pala friska ĉielo; iliaj kapoj estis malaltaj kaj iliaj langoj pendolis.

— Larvaĉoj! — mokis la isengardanoj. — Vi estas kuiritaj. La blankhaŭtuloj kaptos vin kaj manĝos vin. Ili venas.

Ekkrio de Grišnaĥo montris, ke tio ne estis nura ŝerco. Ja rajdantoj rapidege estis ekviditaj: ankoraŭ en malproksimo sed malforiĝantaj al la orkoj, malforiĝantaj al ili, kiel tajdo surplateja al homoj vagantaj en movsablo.

La isengardanoj komencis kuri duoble rapide, kio mirigis Grinĉjon, terura akceliĝo tio ŝajnis je fino de vetkuro. Poste li vidis, ke la suno sinkas, descendante malantaŭ la Nebulecajn Montojn; ombroj etendiĝis tra la tereno. Ankaŭ la soldatoj el Mordoro levis siajn kapojn kaj ekkuris pli rapide. La arbarego estis malluma kaj proksima. Ili jam preterpasis kelkajn

disajn arbojn. La tereno komencis deklivi supren, ĉiam pli krute; sed la orkoj ne haltis. Ugluko kaj Grišnaĥo ambaŭ kriegis, spronante ilin al lasta peno.

“Ili tamen sukcesos. Ili eskapos”, — pensis Grinĉjo. Kaj poste li sukcesis tordi sian kolon por retrorigardi per unu okulo trans la ŝultron. Li vidis, ke rajdistoj fore oriente jam paralelas la orkojn galopante trans la ebenaĵon. La sunsubiro origis ties lancojn kaj kaskojn kaj ekbriletis sur iliaj fluaj haroj. Ili enbaris la orkojn malhelpante ties diskuron kaj pelante ilin laŭlonge de la rivero.

Li tre scivolis, kiaj personoj ili estas. Li jam bedaŭris, ke li ne lernis pli en Rivendelo nek pli ofte rigardis mapojn kaj tiajn aferojn; sed tiutempe la vojaĝplanoj ŝajnis troviĝi en manoj pli kompetentaj, kaj li neniam antaŭvidus distranĉiĝon de Gandalfo aŭ Paŝegulo aŭ eĉ Frodo. Pri Rohano li memoris nur, ke la ĉevalo de Gandalfo, Ombrofakso, devenis de tiu lando. Tio ŝajnis esperiga ĝis certa grado.

“Sed kiel ili scios, ke ni ne estas orkoj? — li pensis. — Supozeble ili neniam aŭdis pri hobitoj ĉi-regione. Supozeble mi devus ĝoji, ke la fiaj orkoj verŝajne estas detruotaj, sed mi prefere saviĝu mem”. Plej probable li kaj Gaja estos mortigitaj kune kun siaj kaptintoj antaŭ ol la rohananoj eĉ sciiĝus pri ili.

Kelkaj rajdistoj ŝajnis esti pafarkistoj, lertaj pafadi desur kuranta ĉevalo. Rajdinte rapide ĝis celdistanco ili pafis sagojn kontraŭ la orkojn kiuj postrestis, kaj pluraj el tiuj falis; poste la rajdistoj forturniĝis el celdistanco de l’ respondaj pafarkoj de la malamikoj, kiuj pafis malorde ne riskante halti. Tio okazis multfoje, kaj unufoje sagoj trafis inter la isengardanoj. Unu el ili, ĝuste antaŭ Grinĉjo, stumblofalis kaj ne plu leviĝis.

Noktiĝis sen tio, ke la rajdistoj proksimiĝis por batalo. Multaj orkoj jam falis, tamen restis almenaŭ ducent. En la frua mallumo la orkoj alvenis teraltaĵeton. La rando de l’ arbarego tre proksimis, verŝajne ne pli ol tri okonojn da mejlo, sed ili ne kapablis pluiri. La rajdistoj ĉirkaŭis ilin. Grupeto malobeis la ordonon de Ugluko kaj kuris plu al la arbarego: nur tri revenis.

— Nu, jen ni estas, — ĉikanis Grišnaĥo. — Bela estreco! Espereble la granda Ugluko elkondukos nin denove.

— Demetu tiujn duonulojn! — ordonis Ugluko malatentante Grišnaĥon. — Vi, Lugduŝo, nomu du aliajn kaj gardostaru apud ili. Ili estas ne mortigotaj, krom se la fiaj blankhaŭtuloj trabrecos. Ĉu komprenite? Dum mi vivas, mi volas ilin. Sed ili ne elkriu kaj ili ne estu elsavitaj. Ligu iliajn krurojn!

La lasta parto de tiu ordono estis senkompate plenumita. Sed Grinĉjo

konstatis, ke la unuan fojon li proksimas al Gaja. La orkoj kreis grandan bruon, kriante kaj klakante per siaj armiloj, kaj la hobitoj sukcesis interflustri dum kelka tempo.

— Tion ĉi mi ne alte taksas, — diris Gaja. — Mi sentas min preskaŭ elĉerpita. Ŝajnas al mi, ke mi ne povus rampi pli multe, eĉ se mi estus libera.

— *Lembaso*! — flustris Grinĉjo. — *Lembaso*. Mi havas iom. Ĉu vi? Al mi ŝajnas, ke ili nenion prenis escepte de niaj glavoj.

— Jes, mi havis paketon en mia poŝo, — respondis Gaja, — sed ĝi verŝajne eretiĝis. Ĉiuokaze mi ne kapablas enpoŝigi mian buŝon!

— Tio ne necesos. Mi... — sed tiumomente sovaĝa piedbato avertis Grinĉjon, ke la bruo sordiniĝis, kaj la gardantoj atentas.

La nokto estis malvarma kaj senmova. Ĉie ĉirkaŭ la altaĵeto, sur kiu amasiĝis la orkoj, ekbrulis gardfajretoj ore ruĝaj en la mallumo, kompleta ringo da ili. Ili estis pafarke atingeblaj, sed la rajdistoj ne montris sin kontraŭ la lumo, kaj la orkoj malŝparis multajn sagojn alpafante la fajrojn, ĝis Ugluko ĉesigis tion. La rajdistoj aŭdigis neniun sonon. Pli poste dum la nokto, kiam la luno aperis el la nebuleto, de tempo al tempo ili vidiĝis, ombrecaj figuroj foje briletantaj en la blanka lumo, dum ili moviĝis en senĉesa patrolado.

— Ili atendos la sunon, damnu ilin! — graŭlis unu el la gardantoj. — Kial ni ne kuniĝas kaj traimpetas? Kion olda Ugluko supozas sin faranta, mi ŝatus scii.

— Verŝajne vi ŝatus, — grincis Ugluko, alpaŝante de poste. — Ĉu vi asertas, ke mi tute ne pensas, ha? Damnu vin! Vi samas la alian kanajlaron: la larvaĉojn kaj la simiojn de Lugburzo. Ne utilas impeti kun ili. Ili simple kvikus kaj forkurus, kaj troviĝas pli ol sufiĉe el tiuj fiaj ĉevalknaboj por balai nian trupon sur la ebenaĵo. Nur unu aferon kapablas tiuj larvaĉoj: ili vidas kiel gufoj en la mallumo. Sed tiuj blankhaŭtuloj havas pli kapablajn nokt-okulojn ol la plimultaj homoj, laŭ miaj informoj; kaj ne forgesu iliajn ĉevalojn! Tiuj povas vidi la nokt-venteton, aŭ tiel oni diras. Tamen unu aferon la bravuloj ne scias: Maŭhuro kaj ties knaboj estas en la arbarego kaj pli-malpli tuje prezentiĝos.

La vortoj de Ugluko sufiĉis verŝajne por trankviligi la isengardanojn; sed la ceteraj orkoj estis samtempe senkuraĝigitaj kaj ribelemaj. Ili postenigis kelkajn gardantojn, sed la plimulto kuŝis sur la tero ripozante en la agrabla mallumo. Efektive, iĝis denove tre mallume; ĉar la luno pasis okcidenten en densan nubaron, kaj Grinĉjo povis vidi nenion pli ol kelkpaŝe malproksimen. La fajroj havigis neniom da lumo al la altaĵeto. Tamen la rajdistoj ne kontentis nur atendi ĝis la aŭroro kaj permesi, ke la malamikoj ripozu. Subita tumulto oriente de la altaĵeto montris, ke io misas. Ŝajnis ke

iuj homoj rajdis proksimen, glisis desur la ĉevaloj, rampis al la rando de l' bivakejo kaj mortigis plurajn orkojn, kaj poste malaperis denove. Ugluko alkuris por malhelpi fuĝegon.

Grinĉjo kaj Gaja eksidis. Iliaj gardintoj isengardaj jam akompanis Uglukon. Sed se la hobitoj pensis eskapi, tiu plano baldaŭ ruiniĝis. Longa haroza brako kaptis ambaŭ ĉe la nuko kaj kuntrenis ilin. Ili malklare konstatis inter si la kapegon kaj hidan vizaĝon de Grišnaĥo; ties fetora spiro tuŝis iliajn vangojn. Li komencis palpi kaj esploraĉi ilin. Grinĉjo tremetis, kiam duraj fridaj fingroj palpserĉis laŭ lia dorso.

— Nu, miaj etuloj! — flustris Grišnaĥo. — ĉu ĝuas belan ripozon? Aŭ ne? Iom malagrable lokite, eble: glavoj kaj vipoj unuflanke kaj timindaj lancoj aliflanke! Etuloj devus ne enmiksiĝi en aferojn por ili tro grandajn. — Liaj fingroj daŭre palpserĉis. Vidiĝis lumo kvazaŭ de pala tamen varmega fajro profunde en liaj okuloj.

Subite venis ekpenso en la menson de Grinĉjo, kvazaŭ rekte perita el la urĝa pensado de lia malamiko: "Grišnaĥo scias pri la Ringo! Li serĉas ĝin, dum Ugluko estas okupata: li probable deziras ĝin por si". Malvarma timo estis en la koro de Grinĉjo, tamen samtempe li pripensis, kiel profiti el la deziro de Grišnaĥo.

— Al mi ŝajnas, ke vi ne trovos ĝin tiamaniere, — li flustris. — Ĝi ne estas facile trovebla.

— *Trovos ĝin*? — diris Grišnaĥo: liaj fingroj ĉesis rampi kaj kaptis la ŝultron de Grinĉjo. — Trovos kion? Pri kio vi parolas, etulo?

Momente Grinĉjo silentis. Poste en la mallumo li subite kreis sonon en la gorĝo:

— *Golum', golum'*. Pri nenio, mia trezorego, — li aldonis. La hobitoj sentis tiki la fingrojn de Grišnaĥo.

— Oh ho! — siblis la gobleno mallaŭte. — Tion li celas, ĉu? Oh ho! Ege eg-e danĝere, etuloj miaj.

— Eble, — diris Gaja, jam vigla kaj konscia pri la konjekto de Grinĉjo. — Eble, kaj ne nur al ni. Tamen vi pli bone scias gvidi la proprajn aferojn. Ĉu vi deziras ĝin aŭ ne? Kaj kion vi donus por ĝi?

— Ĉu mi deziras ĝin? Ĉu mi deziras ĝin? — diris Grišnaĥo kvazaŭ perpleksa, sed liaj brakoj tremetis. — Kion mi donos por ĝi? Kion signifas tio?

— Signifas, — diris Grinĉjo, elektante zorge siajn vortojn, — ke senutilas palpi en la mallumo. Ni povus ŝpari al vi tempon kaj ĝenojn. Sed unue malligu niajn krurojn, aŭ ni faros nenion kaj diros nenion.

— Miaj karaj vundeblaj etaj stultuloj, — siblis Grišnaĥo, — ĉion, kion vi havas kaj ĉion kion vi scias, oni eligos el vi ĝustatempe: ĉion! Vi volos,

ke vi konu pli por rakonti satige al la Demandisto, ja vere: tre baldaŭ. Ni ne rapidigu la enketon. Ho ve ne! Kial, laŭ via opinio, ni tenas vin vivaj? Miaj karaj etuloj, bonvolu kredi, ke tio ne estas pro bonkoreco: tiun malvirton eĉ Ugluko ne havas.

— Tion mi facile kredas, — diris Gaja. — Sed vi ankoraŭ ne hejmigis vian predon. Kaj aferoj ŝajnas ne evolui laŭ viaj deziroj, kio ajn okazas. Se ni alvenos Isengardon, profitos ne la granda Grišnaĥo: Sarumano prenos ĉion troveblan. Se vi volas ion por vi mem, nun estas la tempo marĉandi.

Grišnaĥo komencis perdi sian prudenton. Precipe la nomo Sarumano ŝajnis kolerigi lin. La tempo pasis kaj la tumulto sordiniĝis. Ugluko aŭ la isengardanoj povus reveni ajnmomente.

— Ĉu vi ĝin havas — unu aŭ alia? — li grincvoĉis.

— *Golum', golum'*! — diris Grinĉjo.

— Malligu niajn krurojn! — diris Gaja.

Ili sentis la brakojn de l' orko tremi malmilde.

— Damnu vin, vi fiaj bestaĉoj! — li siblis. — Ĉu malligi viajn krurojn? Mi malligos ĉiun tendenon en viaj korpoj. Ĉu vi supozas, ke mi ne kapablas priserĉi vin ĝis la ostoj? Priserĉi vin! Mi distranĉos vin ambaŭ ĝis tremantaj ĉifonoj. Mi ne bezonas helpon de viaj kruroj por forigi vin — kaj havi vin por mi mem!

Subite li kaptis ilin. La forto de liaj longaj brakoj kaj ŝultroj estis timegiga. Li enŝovis ilin sub po unu akselon, kaj premegis ilin sovaĝe al siaj flankoj; granda sufoka manego klakfermis iliajn buŝojn. Poste li saltis antaŭen, kliniĝante suben. Rapide kaj silente li iris, ĝis li venis al la rando de la altaĵeto. Tie, elektinte breĉon inter la orkaj gardantoj, li pasis kiel misa ombro en la nokton, suben laŭ la deklivo kaj okcidenten al la rivero, kiu elfluis el la arbarego. Tiudirekte estis larĝa apertejo kun unusola fajro.

Irinte dekon da paŝoj li haltis, gvatante kaj aŭskultante. Nenio estis videbla aŭ aŭdebla. Li pluiris malrapide, klinita preskaŭ kunfalde. Poste li kaŭris kaj denove aŭskultis. Poste li stariĝis kvazaŭ riskonte subitan kuregon. Guste tiumomente, malhela figuro de rajdanto aperis antaŭ li. Ĉevalo snufis kaj baŭmis. Viro ekkriis.

Grišnaĥo ĵetiĝis teren, trenante la hobitojn sub sin; poste li elingigis sian glavon. Sendube li intencis mortigi la kaptitojn, prefere ol lasi ilin eskapi aŭ saviĝi; sed tio detruis lin. La glavo tintis mallaŭte kaj iom briletis pro la lumo de fajro fora maldekstre. Sago venis fajfe el la mallumo: ĝi estis lerte celita aŭ sorte gvidita, kaj ĝi trapikis lian dekstran manon. Li lasis fali la glavon kaj kriĉis. Aŭdiĝis rapidaj hufobatoj, kaj ĝuste kiam Grišnaĥo saltleviĝis kaj ekkuris, li estis alrajdita kaj lin trapikis lanco. Li elpuŝis hidan treman kriegon kaj kuŝis senmova.

La hobitoj restis premitaj al la tero kiel lasis ilin Grišnaĥo. Alia rajdisto venis senprokraste por helpi sian kamaradon. Ĉu pro speciala vidpovo aŭ pro iu alia sentumo, la ĉevalo saltis leĝere trans ilin; sed ties rajdanto ne vidis ilin kušantajn, kovritajn de siaj elfaj manteloj, tro premitajn momente kaj tro timplenajn por moviĝi.

Finfine Gaja ekmoviĝis kaj flustris mallaŭte:

— Ĝis tio en ordo, sed kiel *ni* evitu trapikiĝon?

La respondo venis preskaŭ tuj. La krioj de Grišnaĥo avertis la orkojn. Pro la krioj kaj kriĉoj venantaj de la altaĵeto, la hobitoj konjektis, ke ilia malapero estas rimarkita: Ugluko probable forhakis ankoraŭ kelkajn kapojn. Tiam subite aŭdiĝis respondaj krioj de orkaj voĉoj de dekstre, ekster la cirklo de gardfajroj, el direkto de l' arbarego kaj la montoj. Maŭhuro evidente venis kaj atakis la sieĝantojn. Aŭdiĝis galopantaj ĉevaloj. La rajdistoj ringe proksimiĝis al la altaĵeto, riskante la orksagojn por malhelpi eblan ekimpeton, dum trapo forrajdis por trakti la novajn venintojn. Subite Gaja kaj Grinĉjo konstatis, ke nemoviĝinte ili jam troviĝas ekster la cirklo: nenio staris inter ili kaj eskapo.

— Nun, — diris Gaja, — se nur estus liberaj niaj kruroj kaj manoj, ni eble sukcesus forkuri. Sed mi ne povas tuŝi la nodojn kaj mordi ilin mi ne povas.

— Ne necesas provi, — diris Grinĉjo. — Mi intencis diri al vi, ke mi sukcesis liberigi miajn manojn. Jenaj maŝoj funkcias nur ŝajnige. Prefere vi manĝu unue iom da *lembaso*.

Li forigis la ŝnurojn de siaj pojnoj kaj elfosis paketon. La kukoj estis rompitaj sed bonstataj, ankoraŭ en la folivolvaĵoj. La hobitoj manĝis du-tri pecojn. Ties gusto revokis al ili memorojn pri belaj vizaĝoj kaj ridado kaj saniga nutraĵo dum kvietaj tagoj jam malproksimaj. Kelktempe ili maĉis penseme, sidante en la malhelo, senatente pri la krioj kaj sonoj de la apuda batalo. Grinĉjo la unua rekonsciis pri la aktualo.

— Necesas ekiri, — li diris. — Duonmomenton! — La glavo de Grišnaĥo kušis proksime, sed ĝi estis tro peza kaj mallerta por li, do li rampis antaŭen kaj trovinte la kadavron de l' gobleno li elingigis longan akran tranĉilon. Per ĝi li rapide tratranĉis iliajn ligaĵojn.

— Jam temp' esta! — li diris. — Varmiĝinte iomete ni eble povos ekstari denove kaj marŝi. Sed ĉiuokaze ni preferu komenci rampe.

Ili rampis. La herbaĵo estis profunda kaj cedema kaj tio helpis ilin; sed ĝi ŝajnis longa lanta sperto. Ili larĝe evitis la gardofajron, kaj serpentumis antaŭen iom post iom, ĝis ili atingis randon de l' rivero ade gluglanta en la nigraj ombroj sub siaj profundaj bordoj. Tiam ili retrorigardis.

La sonoj forvelkis. Evidente Maŭhuro kaj ties "knaboj" estis mortigitaj

aŭ forpelitaj. La rajdantoj reiris al sia silenta minaca vigilado. Tio ne daŭros multe pli longe. Jam la nokto estis longe daŭrinta. Oriente, kie restis sennube, la ĉielo komencis paliĝi.

— Ni devas trovi kaŝejon, — diris Grinĉjo, — aŭ oni vidos nin. Tute ne konsolos nin, se tiuj rajdantoj rimarkos post nia morto, ke ni estis ne orkoj. — Li stariĝis kaj terenbatis la piedojn. — Tiuj ŝnuroj tranĉis min kvazaŭ dratoj; sed miaj piedoj komencas revarmiĝi. Mi jam povus marŝi ŝanceliĝe. Kiel statas vi, Gaja?

Gaja stariĝis.

— Jes, — li diris, — mi kapablas. *Lembasoj* vere kuraĝigas! Pli sana sento, cetere, ol la ardo de tiu orka likvaĵo. Mi scivolas el kio ĝi estis farita. Prefere ne scii, supozeble. Ni glutu iom da akvo por forlavi pensojn pri ĝi.

— Ne ĉi tie, la bordo tro abruptas, — diris Grinĉjo. — Antaŭen! Ili turniĝis kaj marŝis unu apud la alia malrapide laŭlonge de la rivero. Malantaŭ ili la lumo en la oriento plifortiĝis. Marŝante ili komparis spertojn, babilante hobitmaniere leĝere pri la okazaĵoj post ilia kaptiĝo. Aŭskultanto ne divenus pro iliaj vortoj, ke ili travivis kruelon kaj spertis mortminacan danĝeron irante senespere al turmento kaj morto; nek eĉ ke ĉi-momente, kiel ambaŭ bone sciis, la eblo estis malgranda, ke ili iam retrovos amikojn aŭ sekurecon.

— ŝajnas, ke vi faris sufiĉe bone, mastro Tjuko, — diris Gaja. — Al vi estos dediĉita preskaŭ ĉapitro en la libro de olda Bilbo, se mi iam havos eblecon raporti al li. Bona laboro: precipe la diveno pri l' ludeto de tiu haroza kanajlo kaj via instigo al li. Sed mi scivolas, ĉu oni iam rimarkos viajn postsignojn kaj trovos tiun broĉon? Mi malŝatus perdi la mian, sed mi timas, ke la via estas por ĉiam mankonta.

» Mi devos laborigi miajn piedojn, se mi volos atingi vin. Efektive, kuzo Brandoboko nun devancas. Jen lia enirpunkto. Mi supozas, ke vi apenaŭ scias, kie ni troviĝas; sed mi pasigis la tempon en Rivendelo pli utile. Ni marŝas okcidenten laŭlonge de Entvaŝo. Antaŭ ni estas la finaĵo de l' Nebulecaj Montoj kaj Arbarego Fangorno.

Ĝuste kiam li parolis, baŭmis rekte antaŭe la malhela rando de l' arbarego. La nokto ŝajnis fuĝinta sub ĝiajn arbegojn, rampante for de l' venonta aŭroro.

— Gvidu antaŭen, mastro Brandoboko! — diris Grinĉjo. — Aŭ gvidu retro! Ni estas avertitaj pri Fangorno. Sed tia klerulo certe ne forgesis tion.

— Ja ne, — respondis Gaja, — sed la arbaro ŝajnas al mi preferinda ol returniĝo en la mezon de l' batalo.

Li engvidis sub la grandajn branĉojn de l' arbegoj. Preterdivene maljunaj ili ŝajnis. Grandaj treniĝaj likenbarboj pendis de ili, bloviĝante kaj

balanciĝante pro la venteto. Tra la ombroj gvatis la hobitoj, retrorigardante laŭ la deklivo: etaj kaŝiĝemaj figuroj, kiuj en la malbrila lumo aspektis kiel elfaj infanoj en la tempoprofundo, mire gapantaj el la Sovaĝa Arbaro pro sia unua tagiĝo.

Fore trans la Granda Rivero kaj la Brunaj Terenoj, foraj je pluraj mejloj, venis la aŭroro, ruĝa kiel flamo. Laŭte sonoris la ĉaskornoj salute al ĝi. La rajdistoj el Rohano subite aktiviĝis. Korno revokis denove al korno.

Gaja kaj Grinĉjo aŭdis, klaran en la frida aero, henadon de batalĉevaloj kaj subitan kantadon de multaj homoj. La rando de l' suno estis leviĝinta, fajra arko, super la marĝenon de l' mondo. Tiam la rajdistoj kun kriego impetis el la oriento; la ruĝa lumo ekardis sur maŝkirasoj kaj lancoj. La orkoj ekkriis kaj pafis ĉiujn sagojn restintajn al ili. La hobitoj vidis falon de pluraj rajdantoj; sed ilia linio eltenis supren laŭ la altaĵeto kaj transen, kaj retroturniĝis kaj denove alimpetis. La plimultaj kaperuloj ankoraŭ vivaj disiĝadis kaj disfuĝis, persekutataj unuope ĝis la morto. Sed unu grupo, kuntenigante en nigra kojno, rezolute impetis direkte al la arbarego. Rekte supren laŭ la deklivo ili elanis al la rigardantoj. Jam ili proksimiĝis, kaj ŝajnis certe, ke ili eskapos: ili jam trahakis tri rajdantojn, kiuj baris la vojon.

— Ni rigardis tro longe, — diris Gaja. — Jen Ugluko! Mi ne volas renkonti lin denove. — La hobitoj turniĝis kaj fuĝis profunden en la ombrojn de la arbaro.

Pro tio ili ne vidis la lastan defion, kiam Ugluko estis atingita kaj devigita stari reziste ĉe la rando mem de Fangorno. Tie lin finfine mortigis Eomero, la Tria Marŝalo de Markio, kiu deseliĝis kaj kontraŭbatalis lin per glavo kontraŭ glavo. Kaj tra la larĝaj kampoj la akr-okulaj rajdistoj mortige persekutis tiujn malmultajn orkojn, kiuj eskapis kaj ankoraŭ fortis sufiĉe por fuĝi.

Poste, amasiginte siajn falintajn kamaradojn kaj kantinte laŭde al ili, la rajdistoj bruligis fajregon kaj disĵetis la cindrojn de siaj malamikoj. Tiel finiĝis la rabinvado, kaj pri ĝi neniam venis informoj al Mordoro kaj Isengardo, sed la fumo de la bruligo leviĝis alte en la ĉielon kaj estis vidita de multaj atentemaj okuloj.

4

Arbobarbo

Dume la hobitoj progresis tiel rapide, kiel permesis la malhela kaj implikita arbaro, laŭlonge de la fluanta rojo okcidenten kaj supren al la montdeklivoj, pli kaj pli funden en Fangornon. Iom post iom formortis ilia timo pri la orkoj, kaj ilia irado malstreĉiĝis. Stranga sento de sufokiĝo trafis ilin, kvazaŭ la aero estus tro maldensa aŭ tro nesufiĉa por spirado. Finfine haltis Gaja.

— Ni ne povos daŭrigi tiel, — li anhelis. — Mi bezonas iom da aero.

— Ni trinku ĉiuokaze, — diris Grinĉjo. — Mi plensekiĝis. — Li surgrimpis grandan arbradikon kiu kurbiĝis en la rojon, kaj kliniĝante levis iom da akvo per siaj kavigitaj manoj. Ĝi estis klara kaj frida, kaj li glutis multfoje. Gaja sekvis lin. La akvo refreŝigis ilin kaj ŝajnis feliĉigi iliajn korojn; dum kelka tempo ili sidis kune ĉerande de la rojo trempante siajn dolorajn piedojn kaj krurojn kaj ĉirkaŭrigardante al la arboj, kiuj staris silente en la proksimo, vic-post-vice ĝis ili malaperis en grizan krepuskon ĉiudirekte.

— Supozeble vi ne jam perdigis al ni la vojon? — diris Grinĉjo apogante sin al granda arbotrunko. — Ni povos almenaŭ sekvi la fluejon de tiu ĉi rivereto, Entvaŝo, aŭ kiel vi nomas ĝin, kaj reeliri tie, kie ni eniris.

— Tion ni povus se niaj kruroj kapablus, — diris Gaja, — kaj se ni povus spiri senĝene.

— Jes, ĉi tie estas tre malhele kaj sufoke, — diris Grinĉjo. — Ĝi iel memorigas min pri la malnova ĉambro en la Granda Domo de Tjukoj malantaŭe inter la smialoj ĉe Tjukboro: grandega loko, kie dum generacioj la mebloj estis nek movitaj nek ŝanĝitaj. Oni diras, ke la Olda Tjuko loĝadis en ĝi jaron post jaro, dum li kaj la ĉambro kune plioldiĝis kaj pli kadukiĝis — kaj ĝi estas neniam ŝanĝita depost lia morto, antaŭ jarcento. Kaj Olda Geronto estis mia prapraavo, kio distancigas tion. Sed tio neglektindas kompare kun la maljuneca sento de tiu ĉi arbaro. Vidu tiujn plorajn treniĝajn barbojn kaj hararojn da likeno! Kaj la plimultaj arboj ŝajnas duonkovritaj de ĉifonaj sekaj folioj neniam falintaj. Malnete. Mi ne povas imagi kiel aspektus ĉi tie printempo, se ĝi iam venus, des malpli printempa purigado.

— Sed almenaŭ la suno devas engvati kelkfoje, — diris Gaja. — Ĝi tute ne aspektas aŭ sentiĝas kiel la priskribo pri la Mornarbaro de Bilbo. Tiu

estis tute malluma kaj nigra kaj la hejmo de sombraj nigraĵoj. Tiu ĉi nur malhelas kaj estas ege arbeca. Oni tute ne povas imagi, ke *bestoj* loĝadus ĉi tie aŭ restus longe.

— Ne, ankaŭ ne hobitoj, — diris Grinĉjo. — Kaj ankaŭ ne plaĉas al mi la supozo, ke ni provu trairi ĝin. Nenio manĝebla tra cent mejloj, mi emas kredi. Kiel statas nia provianto?

— Malabunde, — diris Gaja. — Ni forkuris kun nenio krom du-tri pakaĵoj da *lembaso*, kaj ĉion alian ni postlasis. — Ili rigardis la restaĵon de la elfaj kukoj: sufiĉe da rompitaj eroj por ĉirkaŭ kvin magraj tagoj, jen ĉio. — Kaj nenia volvtuko aŭ lankovrilo, — diris Gaja. — Ni sentos nin malvarmaj ĉi-nokte, kien ajn ni iros.

— Nu, prefere ni nun decidu pri la vojo, — diris Grinĉjo. — La mateno certe ekoldiĝas.

Ĝuste tiam ili konsciiĝis pri flava lumo aperinta iom pli funde en la arbaro: strioj da sunlumo ŝajnis subite penetrintaj la arbaran supron.

— Atentu! — diris Gaja. — La suno verŝajne kovriĝis de nubo dum ni estis sub ĉi arboj, kaj nun reaperis; aŭ alternative ĝi supreniĝis sufiĉe alte por trarigardi suben iun breĉon. Ne estas malproksime — ni iru esplori!

Ili trovis tion pli malproksima ol ili supozis. La tereno ankoraŭ leviĝis apike, kaj fariĝis ĉiam pli ŝtonoza. La lumo plilarĝiĝis, dum ili pluiris kaj baldaŭ ili vidis antaŭ si rokmuron: flanko de monteto aŭ abrupta ekstremo de iu longa radiko elpuŝita de la distaj montoj. Neniu arbo kreskis sur ĝi, kaj la suno plentrafis ĝian ŝtonan frunton. La arbaj branĉeretoj ĉe ĝia subaĵo estis etenditaj rigide kaj senmove, kvazaŭ streĉante sin al la varmo. Tie ĉio antaŭe aspektis tiom malfreŝa kaj griza, la arbaro jam ekbrilis je riĉaj brunoj kaj la glataj griznigroj de arboŝelo kiel polurita ledo. La arbotrunkoj ardis malmolverde kiel juna herbo: fruprintempo aŭ provizora vizio pri ĝi ĉirkaŭis ilin.

Surfrunte de la ŝtona muro troviĝis io ŝtuparsimila: eble natura kaj kreita per la vetero kaj fendiĝo de la rokoj, ĉar ĝi estis kruda kaj malebena. Altsupre, preskaŭ samnivele kun la suproj de l’ arboj, estis malgranda breto sub klifo. Nenio kreskis tie escepte de kelkete da herbo kaj loloj ĉe ĝia rando kaj unusola maljuna arbostumpo, al kiu restis nur du kurbaj branĉoj: ĝi aspektis preskaŭ kiel figuro de tuberoza maljunulo staranta tie, palpebrumante en la matena lumo.

— Do supren! — diris Gaja ĝojplene. — Atendas spirebla aero kaj videbla tereno!

Ili grimpis kaj surkrablis la rokon. Se la ŝtuparo estis artefarita, ĝi celis piedojn pli grandajn kaj krurojn pli longajn ol la iliaj. Ili tro entuziasmis por miri pri la rimarkinda kuraciĝo de l’ vundetoj kaj kontuzoj pro ilia kaptiteco

kaj pri la reveno de ilia viglo. Ili venis finfine al la eĝo de la breto preskaŭ sube de l' maljuna arbotrunko. Tiam ili supren saltis kaj turniĝis prezentante siajn dorsojn al la deklivo, profunde spirante kaj rigardante orienten. Ili konstatis, ke ili penetris en la arbaron nur tri aŭ kvar mejlojn: la arbopintoj etendiĝis suben al la ebenaĵo. Tie apud la franĝo de l' arbaro altaj spiraloj da serpentuma nigra fumo leviĝis, ŝanceliĝante kaj flosante al ili.

— La vento ŝanĝas direkton, — diris Gaja. — Ĝi denove turniĝis orienten. Ĉi tie sentiĝas freŝe.

— Jes, — diris Grinĉjo, — mi timas, ke temas pri nura pasema ekbrilo kaj poste ĉio denove griziĝos. Kiel domaĝe! Tiu ĉi vila maljuna arbaro aspektis tiel malsame en la sunlumo. Mi preskaŭ sentis, ke mi ŝatas ĝin.

— Preskaŭ sentis, ke vi ŝatas la Arbaregon! Tre bone! Vi ekstreme ĝentilas, — diris nekonata voĉo. — Turnu vin kaj permesu, ke mi rigardu viajn vizaĝojn. Mi preskaŭ sentas, ke mi malŝatas vin ambaŭ, sed ni ne tro impetu. Turnu vin! — Granda nod-artika mano estis metita al ŝultro de ambaŭ, kaj ili estis ĉirkaŭturnitaj malsovaĝe tamen nerezisteble, poste du grandaj brakoj levis ilin supren.

Ili konstatis, ke ili rigardas vizaĝon eksterordinaran. Ĝi apartenis al granda homsimila, preskaŭ trolsimila, figuro alta almenaŭ dek kvar futojn, tre fortika kun alta kapo kaj preskaŭ nenioma kolo. Ĉu ĝi estis vestita en ŝtofo simila al verda kaj griza arboŝelo, aŭ ĉu tio estis ĝia felo, estis malfacile juĝebla. Ĉiuokaze la brakoj proksime al la trunko estis ne sulketitaj, sed kovritaj per bruna glata haŭto. La piedegoj havis po sep fingroj. La suban parton de la longa vizaĝo kovris abunda griza barbo, hirta, preskaŭ branĉeteska ĉeradike, maldensa kaj muska ĉefine. Sed tiumomente la hobitoj rimarkis malmulton krom la okuloj. Tiuj profundaj okuloj nun esploris ilin, lante kaj gravmiene, sed tre penetre. Ili estis brunaj, muaraj je verda lumo. En posta tempo Grinĉjo ofte provis priskribi sian unuan impreson pri ili.

"Oni sentis, ke post ili estas enorma puto plena da eonoj da memoro kaj longa malrapida senŝancela pensado; sed ilia surfaco ekbriletis je la estanteco: kiel sunlumo tremanta ĉe la eksteraj folioj de vasta arbo, aŭ sur la ondetiĝo de tre profunda lago. Mi ne scias, sed sentiĝis kvazaŭ io kreskinta en la tero — dormanta eble aŭ nur sentanta sin io inter radikopinto kaj foliopinto, inter profunda tero kaj ĉielo, subite vekiĝis kaj esploras onin per la sama malrapida zorgemo, kian ĝi dediĉis dum senfinaj jaroj al siaj propraj internaj aferoj".

— *Hrum, hum*, — murmuris la voĉo, voĉo profunda kiel tre basa ligna blovinstrumento. — Vere tre strange! Ne hastu, jen mia devizo. Sed se mi vidus vin antaŭ ol aŭdi viajn voĉojn — ili plaĉis al mi: agrablaj etaj voĉoj,

ili pensigis min pri io, kion mi ne povas memori — se mi vidus vin antaŭ ol aŭdi vin mi surtretus vin, supozante vin malgrandaj orkoj, kaj poste konstatus mian eraron. Tre strangaj vi estas efektive! Je radiko kaj branĉeto, tre strangaj!

Grinĉjo, kvankam ankoraŭ mirigita, ne plu sentis timon. Antaŭ tiuj okuloj li spertis kuriozan necertecon, sed ne timon.

— Mi petas, — li diris, — kiu vi estas? Kaj kio vi estas? Stranga mieno aperis en tiuj maljunaj okuloj, speco de singardemo; la profundaj putoj kovriĝis.

— *Hrum*, do, — respondis la voĉo, — nu, mi estas ento, aŭ tiel oni nomas min. Jes, ento estas la vorto. Mi estas *la* ento, vi povus diri laŭ via parolmaniero. *Fangorno* estas mia nomo laŭ iuj, aliaj faras ĝin *Arbobarbo. Arbobarbo* konvenos.

— Ĉu *ento*? — diris Gaja. — Kio estas tio? Sed kiel vi nomas vin mem? Kio estas via reala nomo?

— Hu nu! — respondis Arbobarbo. — Hu! Rivele nebele! Ne tiom haste. Kaj estas *mi*, kiu starigas demandojn. Vi troviĝas en *mia* tereno. Kio estas *vi*, mi scivolas. Mi ne povas identigi vin. Vi ŝajnas ne aperi sur la malnovaj listoj, kiujn mi parkeris kiam juna. Sed tio estis antaŭ tre tre longe, kaj eble oni kompilis novajn listojn. Mi pripensu! Kiel tio elfalis?

Lernu la veron pri la Vivantoj!
Listu la kvaron, la liberulojn:
ege prapraaj, la elf-infanoj;
gnomoj-fosantoj, sombras la domoj;
entoj elteraj, monte maljunaj;
homoj mortemaj, mastroj ĉevalaj:

Hm, hm, hm.

Konstrua kastoro, cervo saltema,
Urs' abelĉasa, apro ataka;
hundo malsatas, timas leporo...

hm, hm.

Aglo en alto, bov' en paŝtejo,
damao kornkrona; ek! akcipitro,
cigno plej blankas, fridas serpento...

Hum, hm; hum, hm, kia ĝi estis? Rum tam, rum tam, rume tum tam. Ĝi estis listo longa. Sed vi ĉiuokaze ŝajnas ne enlistiĝi!

— Ni ŝajnas ĉiam ellasitaj el la malnovaj listoj kaj rakontoj, — diris

Gaja. — Tamen ni ekzistas jam sufiĉe longe. Ni estas *hobitoj*.

— Kial ne verki novan verson? — diris Grinĉjo:

Duonulaj hobitoj en truaj domoj.

Inkluzivu nin inter la kvaro, apud la homoj (la granda popolo), kaj tio trafas.

— Hm! Ne malbone, ne malbone, — diris Arbobarbo. — Tio sufiĉus. Do vi loĝas en truoj, ĉu? Tio sonas tre juste kaj ĝuste. Tamen kiu nomas vin *hobitoj*? Tio ne sonas al mi elfe. Elfoj kreis ĉiujn malnovajn vortojn, ili komencigis ĉion.

— Aliuloj ne nomas nin hobitoj; ni mem nomas nin tiel, — diris Grinĉjo.

— Hum, hm! Atentu! Ne tiom haste! Vi nomas *vin mem* hobitoj, ĉu? Sed vi ne devus sciigi tion al ĉiu nekonato. Vi rivelos la proprajn realajn nomojn, se vi ne gardos vin.

— Ni ne gardas nin pri tio, — diris Gaja. — Efektive mi estas Brandoboko, Gajadoko Brandoboko, kvankam kutime oni alinomas min Gaja.

— Kaj mi estas Tjuko, Peregrino Tjuko, sed oni ĝenerale nomas min Grinĉjo.

— Hm, sed vi *estas* popolo hasta, mi konstatas, — diris Arbobarbo. — Honoras min via konfido, sed vi devus ne esti tiom malkaŝaj senrezerve. Ekzistas entoj kaj aliaj entoj, sciu; aŭ estas entoj kaj aĵoj aspektantaj kiel entoj, sed ne estas, oni povas diri. Mi nomos vin Gaja kaj Grinĉjo, se vi permesas — agrablaj nomoj. Ĉar mi ne intencas sciigi al vi *mian* noraon, nu ĉiuokaze ankoraŭ ne. — Stranga duonsagaca duonhumura mieno aperis kun verda ekflagro en liaj okuloj. — Ekzemple, tio postulus tre longan tempon: mia nomo plilongiĝas la tutan tempon, kaj mi tre tre longe vivis; do *mia* nomo similas rakonton. En mia lingvo realaj nomoj rakontas la historion de tiu al kiu ili apartenas, en la praenta, kiel oni povas diri. Tio estas lingvo aminda, sed okupas longan tempon diri ion per ĝi, ĉar ni ne diras en ĝi ion, krom se valoras okupi longan tempon per la dirado kaj por la aŭskultado.

» Sed nun, — la okuloj iĝis tre helaj kaj *estantecaj*, ŝajne plietiĝantaj kaj preskaŭ akriĝantaj, — kio okazas? Kiel vi rolas en la tuto? Mi povas vidi kaj aŭdi (kaj flari, kaj senti) de sur jena, de sur jena, de sur jena *a-lalla-lalla-rumba-kamanda-lind-or-burúmë*. Pardonu min: tio estas parto de mia nomo por ĝi; mi ne konas la vorton en la eksteraj lingvoj: vi scias, tio kion ni suras, kie mi staras kaj elrigardas en belaj matenoj kaj pensas pri la suno, kaj la herbo ekster la arbaro, kaj la ĉevaloj, kaj la nuboj, kaj la disvolviĝo de la mondo. Kio okazas? Kion faras Gandalfo? Kaj tiuj — *burárum*, — li

eligis basan murmuregan sonon kiel misagordon ĉe orgenego, — tiuj orkoj, kaj juna Sarumano en Isengardo? Mi ŝatas informojn. Sed ne tro haste jam.

— Okazas sufiĉe multe, — diris Gaja, — kaj eĉ se ni klopodus hasti, necesus longa tempo por rakonti ĝin. Sed vi diris, ke ni ne hastu. Ĉu ni devas sciigi al vi ion ajn tiel baldaŭ? Ĉu vi taksus malĝentile, se ni demandus, kion vi intencas fari pri ni, kaj kiun flankon vi subtenas? Kaj ĉu vi konis Gandalfon?

— Jes, mi konas lin: la solan sorĉiston, kiu vere zorgas pri arboj, — diris Arbobarbo. — Ĉu vi konas?

— Jes, — diris Grinĉjo malĝoje, — ni konas. Li estis bonega amiko, kaj li estis nia gvidanto.

— Do mi povas respondi viajn aliajn demandojn, — diris Arbobarbo. — Mi ne intencas fari ion ajn *pri* vi: nome se per tio vi volas diri "fari ion *al* vi" sen via permeso. Ni eble faros kelkajn aferojn kune. Mi nenion scias pri flankoj. Mi sekvas propran vojon, sed eble via vojo koincidos dum kelka tempo kun la mia. Sed vi parolas pri Mastro Gandalfo, kvazaŭ li estus en historio finiĝinta.

— Jes, tion ni faras, — diris Grinĉjo malĝoje. — La historio verŝajne daŭras, sed bedaŭrinde Gandalfo elfalis el ĝi.

— Ha, atentu! — diris Arbobarbo. — Hu hm, nu ja. — Li paŭzis, longe rigardante la hobitojn. — Hu hm, ha, ja mi ne bone scias kion diri. Atentu!

— Se vi emas aŭdi pli, — diris Gaja, — ni rakontos. Sed tio daŭros kelkan tempon. Ĉu vi ne volas demeti nin? Ĉu ni ne povus sidi ĉi tie en la sunlumo dum ĝi daŭras? Vi verŝajne laciĝas alte tenante nin.

— Hm, *laciĝas*? Ne, mi ne laciĝas. Ne facile mi laciĝas. Kaj mi ne sidiĝas. Mi ne tre, hm, klineblas. Sed vidu, la suno *jam* foriras. Ni forlasu tiun ĉi — ĉu vi diris kiel vi nomas ĝin?

— Monteto? — sugestis Grinĉjo.

— Breto? ŝtupo? — sugestis Gaja. Arbobarbo penseme ripetis la vortojn.

— *Monteto*. Jes, jen ĝi. Sed tio estas hasta vorto por io, kio staris ĉi tie ekde kiam tiu ĉi mondparto estis formita. Ne gravas. Ni forlasu ĝin, ni iru.

— Kien ni iru? — demandis Gaja.

— Al mia hejmo, aŭ unu el miaj hejmoj, — respondis Arbobarbo.

— Ĉu ĝi malproksimas?

— Mi ne scias. Eble vi dirus ĝin malproksima. Sed kiom tio gravas?

— Nu, vidu, ni perdis ĉiujn niajn posedaĵojn, — diris Gaja. — Ni havas nur malmulte da nutraĵo.

— O! Hm! Ne necesas ĝeniĝi pri tio, — diris Arbobarbo. — Mi povas havigi al vi trinkaĵon, kiu tenos vin verda kaj kreskanta dum tre tre longa

tempo. Kaj se ni decidos disiĝi, mi kapablos demeti vin ekster mia tereno ie ajn laŭ via elekto. Ni iru!

Tenante la hobitojn milde sed firme po unu sur siaj antaŭbrakoj, Arbobarbo levis unue unu piedegon kaj poste la alian, kaj movis ilin ĝis la rando de l' breto. La radiksimilaj piedfingroj kaptis la rokojn. Tiam zorge kaj gravmiene li paŝis suben de ŝtupo al ŝtupo kaj atingis la subaĵon de l' Arbarego.

Tuj li ekmarŝis tra la arboj per longaj konsciaj paŝoj, ĉiam pli profunden en la arbaron, neniam tre fore de la rivereto, suprenirante sendevie al la montaj deklivoj. Multaj arboj ŝajnis dormantaj, aŭ same nekonsciaj pri li kiel pri ajna alia estaĵo, kiu simple preterpasis; sed kelkaj ektremis kaj kelkaj levis siajn branĉojn super lian kapon kiam li proksimiĝis. La tutan tempon, dum li marŝis, li parolis al si per longa senĉesa fluo de muzikecaj sonoj.

La hobitoj silentis dum kelka tempo. Ili sentis sin, iom strange, sekuraj kaj komfortaj, kaj ili havis multon pripensindan kaj mirindan. Fine Grinĉjo riskis paroli denove.

— Mi petas, Arbobarbo, — li diris, — ĉu mi rajtas starigi demandon? Kial Celeborno avertis nin kontraŭ via arbarego? Li diris, ke ni ne risku enplektiĝi en ĝi.

— Hmm, ĉu tion li diris? — murmuregis Arbobarbo. — Kaj mi eble dirus proksimume la samon, se vi irus inverse. Ne risku enplektiĝi en la arbarego *Laŭrelindorenanol* Tiel nomis ĝin siatempe la elfoj, sed nun ili mallongigas la nomon: *Lotlorieno* ili nomas ĝin. Eble ili pravas: eble ĝi velkas, ne kreskas. Lando de l' Valo de Kantanta Oro, tia ĝi estis iam. Nun ĝi estas la Sonĝfloro. Ha do! Sed ĝi estas loko stranga kaj ne de ĉiu ajn enirinda. Surprizas min, ke vi sukcesis eliri, sed multe pli surprizas min, ke vi sukcesis eniri: tiel ne okazis al fremduloj jam de multaj jaroj. Ĝi estas lando stranga. Kaj strangas ankaŭ tiu ĉi. Personoj ĉi tie paneis. Jes, tiel, paneis. *Laurelindórenan lindelorendor malinornélion ornemalin*, — li zumis al si. — Tie oni iom postlamas la mondon, verŝajne. Nek tiu ĉi lando, nek io ajn ekster la Ora Arbaro estas tia, kia ĝi estis, kiam Celeborno junis. Tamen:

Taurililómëa-tumbalemorna Tumbaletaurëa Lómëanor,

tion ili kutimis diri. Ŝanĝiĝis aferoj, sed tio ankoraŭ veras en iuj lokoj.

— Kion vi celas? — diris Grinĉjo. — Kio veras?

— La arboj kaj la entoj, — diris Arbobarbo. — Mi mem ne komprenas ĉion, kio okazas, do mi ne povas tion klarigi al vi. Iuj el ni ankoraŭ estas veraj entoj kaj sufiĉe viglaj niamaniere, sed multaj ekdormemas, iĝas

arbecaj, oni povus diri. La plimultaj arboj estas nur arboj, kompreneble; sed multaj duone maldormas. Iuj estas vere maldormaj, kaj kelkaj, nu, ha, nu, ekiĝas *entaj*. Tio okazas la tutan tempon. Kiam tio okazas al arboj, rimarkeblas, ke iuj havas korojn *malbonajn*. Ne temas pri ilia ligno: tion mi ne volas diri. Vidu, mi konis kelkajn bonajn oldajn salikojn apud Entvaŝo, delonge forpasintajn, ve! Ili estis tute kavaj, efektive ili dispeciĝis, tamen tiel kvietaj kaj dolĉparolaj kiel juna folio. Kaj aliflanke troviĝas iuj arboj en la valoj kaj sub la montoj, tute fortikaj kaj interne komplete malbonaj. Tia afero ŝajnas vastiĝema. Pli frue estis kelkaj partoj de tiu ĉi tereno tre danĝeraj. Ankoraŭ restas kelkaj tre nigraj lokoj.

— Samkiel la Maljuna Arbaro en la fora nordo, ĉu vi volas diri? — demandis Gaja.

— Jes, jes, iom simila, sed multe pli malbona. Sendube ankoraŭ kuŝas en la fora nordo ia ombro de l' Granda Mallumo; kaj misaj memoroj herediĝas. Sed en tiu ĉi lando ekzistas kavaj valetoj ĉe kiuj neniam estis forigita la Mallumo, kaj la arboj estas pli maljunaj ol mi. Tamen ni faras, kion ni povas. Ni forbaras fremdulojn kaj senprudentulojn; kaj ni trejnas kaj instruas, ni marŝas kaj forigas lolojn.

» Ni estas arbo-prizorgantoj, ni maljunaj entoj. Restas tro malmultaj el ni nuntempe. Ŝafoj eksimilas paŝtiston, kaj paŝtistoj ŝafojn, oni diras; sed malrapide, kaj neniu el ambaŭ longe vivas en la mondo. Okazas pli rapide kaj pli paralele ĉe arboj kaj entoj, kaj ili tramarŝas la epokojn kune. Ĉar entoj pli similas elfojn: malpli egoismaj ol la homoj kaj pli kapablaj trafi alies internon. Kaj tamen entoj pli similas la homojn, pli ŝanĝiĝemaj ol elfoj kaj pli rapide ekhavas la koloron de l' ekstero, oni povus diri. Aŭ pli bonas ol ambaŭ, ĉar ili estas pli fidindaj kaj pli longe atentas aferojn.

» Iuj el miaj parencoj jam aspektas tute kiel arboj kaj bezonas ion grandan por veki ilin; kaj ili parolas nur flustre. Sed iuj el niaj arboj estas membre viglaj, kaj multaj povas paroli al mi. Elfoj komencigis tion, kompreneble, vekante arbojn kaj instruante al ili la parolkapablon kaj lernante ilian arblingvon. Ili ĉiam deziris alparoli ĉion, la pratempaj elfoj. Sed tiam venis la Granda Mallumo, kaj ili foriris trans la maron aŭ fuĝis en forajn valojn, kaj sin kaŝis kaj kreis kantojn pri tagoj neniam plu revenontaj. Neniam plu. Jes, jes, iam estis nur unusola arbaro de ĉi tie ĝis la Montoj de Ljuno, kaj tiu ĉi estis nur la orienta ekstremo.

» Tiuj estis la tagoj larĝaj! Estis tempo, kiam mi povis marŝi kaj kanti tra la tuta tago kaj aŭdi nenion krom la eĥon de mia propra voĉo en la kavaj montoj. La arbaro similis la arbaron de Lotlorieno, sed pli densis, pli fortis, pli junis. Kaj la odoro de l' aero! Mi kutimis pasigi semajnon nur spirante.

Arbobarbo eksilentis, daŭre marŝante kaj tamen apenaŭ bruante per siaj

grandaj piedoj. Poste li komencis denove zumi, kaj transiris al murmura ĉantado. Iom post iom la hobitoj konstatis, ke li ĉantas al ili:

Inter salikaroj de Tasarinan mi promenis printempe.
Ha! l' aspekto kaj l' odoro printempaj en Nan-tasarion!
Kaj mi diris, ke tio bonas.
Mi vagis somere en ulmarbaroj de Ossiriand.
Hal la lum' kaj muziko someraj apud Sep Riveroj de Ossir!
Kaj mi taksis plej bona tion.
Al fagoj de Neldored' mi venis aŭtune.
Ha! la oro kaj ruĝo, foliosopiro aŭtune en Taur-na-neldor!
Tio superis mian deziron.
Al pinoj sur la altaĵo de Dorthonion mi grimpis en vintro.
Ha! la vento kaj blanko kaj nigraj vintraj branĉoj sur Orod-na-Thôn!
Mia voĉo leviĝis kaj kantis en la ĉielo.
Kaj nun ĉi landoj kuŝas sub la ondaro,
kaj mi marŝas en Ambarono, en Tauremorno, en Aldalomo,
en la propra lando, tereno de Fangorno,
kie longas radikoj,
kaj la jaroj kuŝas pli dense ol la folioj
en Taŭremornalomo.

Li ĉesis kaj marŝis antaŭen silente, kaj en la tuta arbaro ĝis povis atingi l' orelo aŭdiĝis neniu sono.

La tago velkis, kaj krepusko plektiĝis ĉirkaŭ la arbotrunkojn. Finfine la hobitoj vidis svage leviĝanta antaŭ ili apikan malhelan terenon: ili venis al la montosuboj kaj verdaj radikoj de alta Metedraso. Malsupren laŭ la deklivo la juna Entvaŝo, saltante de siaj fontoj altsupre, fluis brue de ŝtupo al ŝtupo renkonte al ili. Dekstre de la fluo troviĝis longa deklivo herbvestita, nun griza en la krepusko. Tie kreskis neniuj arboj, kaj ĝi estis aperta sub la ĉielo; steloj jam brilis lagece inter bordoj da nuboj.

Arbobarbo marŝis supren laŭ la deklivo, apenaŭ lantigante sian paŝadon. Subite la hobitoj ekvidis antaŭ si larĝan trairejon. Du grandaj arboj staris tie po unu ambaŭflanke kiel vivaj pordfostoj; sed mankis pordo krom iliaj transiraj kaj interplektitaj branĉaroj. Kiam la maljuna ento proksimiĝis, ili levis siajn branĉojn kaj ĉiuj folioj vibris kaj susuris. Ĉar ili estis arboj ĉiamverdaj, kaj iliaj folioj estis malhelaj kaj poluritaj kaj briletis en la krepusko. Trans ili estis larĝa ebeno, kvazaŭ la planko de granda halo estus eltranĉita el la montflanko. Ambaŭflanke la muroj deklivis supren, ĝis ili altis kvindek futojn aŭ pli, kaj laŭlonge de ĉiu muro staris flanknavo da arboj, kiuj same plialtiĝis, kiam ili etendiĝis enen.

Ĉe la fora ekstremo la rokmuro apikis, sed ĉe la subo ĝi estis retrokavigita al malprofunda golfeto kun arka tegmento: la sola tegmento de la halo krom la arbobranĉoj, kiuj ĉe la ena ekstremo superombris la tutan teron lasante nur larĝan apertan padon en la mezo. Rojeto eskapis el la supraj fontoj, kaj lasinte la ĉeffluon falis tinte laŭ la apika mursupraĵo, verŝiĝante kiel arĝentaj gutoj kvazaŭ maldensa kurteno antaŭ la arka golfeto. La akvo denove kolektiĝis en ŝtona baseno en la planko inter la arboj, kaj de tie ĝi elverŝiĝis kaj forfluis apud la aperta pado, elen por realiĝi al Entvaŝo por ties vojaĝo tra la arbarego.

— Hm! Jen ni estas! — diris Arbobarbo ĉesigante sian longan silenton. — Mi gvidis vin tra proksimume sepmil entpaŝoj, sed kioma estas tio laŭ vialanda mezursistemo, mi ne scias. Ĉiuokaze ni estas proksimaj al la radikoj de la Lasta Monto. Parto de l' nomo de tiu ĉi loko estas Putohalo, tradukite en vian lingvon. Ĝi plaĉas al mi. Hodiaŭ nokte ni ripozos ĉi tie.

Li demetis ilin sur la herbon inter la flanknavoj da arboj, kaj ili sekvis lin al la granda arko. La hobitoj nun rimarkis, ke dummarŝe li apenaŭ kurbigis siajn genuojn, sed liaj kruroj malfermiĝis grandpaŝe. Li metis unue siajn grandajn piedfingrojn (kaj tiuj ja estis grandaj kaj tre larĝaj) sur la teron antaŭ ol alian parton de la piedo.

Momente Arbobarbo staris sub la pluvo de l' falanta fontakvo kaj profunde enspiris; poste li ridis kaj trapasis. Staris tie granda ŝtona tablo, sed neniuj seĝoj. Fone de la haleto estis jam sufiĉe mallume. Arbobarbo levis du ujegojn kaj starigis tiujn sur la tablon. Ili ŝajnis akvoplenaj, sed li etendis siajn manojn super ili kaj tuj ili komencis lumiĝi, unu ore kaj la alia riĉverde; kaj kunfandiĝo de la du lumoj heligis la golfeton kvazaŭ somera suno trabrilus tegmenton da junaj folioj. Rerigardante, la hobitoj vidis, ke ankaŭ la arboj en la korto eklumas, unue malforte, sed daŭre plifortiĝante ĝis ĉiun folion randis lumo: iuj verdaj, iuj oraj, iuj ruĝaj kiel kupro, dum la arbotrunkoj similis pilastrojn mulditaj el fosforeska ŝtono.

— Nun, nu, nun ni povas paroli denove, — diris Arbobarbo. — Vi estas soifaj, mi supozas. Eble vi estas ankaŭ lacaj. Trinku jenon! — Li iris al la angulo, kaj ili ekvidis, ke tie staras pluraj altaj ŝtonaj vazoj kun pezaj kovriloj. Li formetis unu el la kovriloj kaj enmetis ĉerpilegon kaj per ĝi plenigis tri bovlojn, unu grandan kaj du malgrandajn.

— Tiu ĉi estas enta domo, — li diris, — kaj mankas seĝoj, bedaŭrinde. Sed vi rajtas sidi sur la tablo. — Levinte la hobitojn li metis ilin sur la grandan ŝtonplaton, ses futojn super la tero, kaj tie ili sidis svingante siajn krurojn kaj glutante la trinkaĵon.

La trinkaĵo similis akvon, efektive tre similis la guston de la akvo, glutita el Entvaŝo apud la arbarorando, kaj tamen enestis ia parfumo aŭ

spicaĵo, kiun ili ne povis priskribi: ĝi estis malforta, sed ĝi memorigis ilin pri la odoro de fora arbareto, kiun alportas de fore friska nokta venteto. La efiko de l' trinkaĵo komenciĝis ĉe la piedfingroj kaj leviĝis senhalte tra ĉiuj membroj, provizante freŝecon kaj viglon, dum ĝi fluis supren ĝis la ekstremoj mem de la haroj. Efektive, la hobitoj sentis kvazaŭ la kapharoj vere hirtiĝus ondiĝante, bukliĝante kaj kreskante. Kiom koncernis Arbobarbon, li unue lavis siajn piedojn en la baseno post la arko kaj poste li unuglute eltrinkis sian bovlon per sola longa lanta gluto. Al la hobitoj ŝajnis, ke li neniam ĉesos. Finfine li remetis la bovlon.

— Ha-ha, — li ĝemspiris. — Hm, hum, jam ni pli facile povos interparoli. Vi povos sidi sur la planko, kaj mi kuŝiĝos. Tio malhelpos, ke tiu trinkaĵo atingu mian kapon kaj endormigu min.

Dekstraflanke troviĝis litego kun malaltaj kruroj, alta ne pli ol du futojn, profunde kovrita de sekigita herbo kaj filikoj. Arbobarbo sin mallevis malrapide sur ĝin (kun nur plej eta indiko pri kurbiĝo en la mezo) ĝis li kuŝis plene etendite, kun la brakoj malantaŭ la kapo, rigardante la plafonon sur kiu flagris lumoj kvazaŭ ludado de folioj en la sunlumo. Gaja kaj Grinĉjo eksidis apud li sur kusenoj da herbo.

— Nun rakontu vian historion kaj ne rapidu! — diris Arbobarbo. La hobitoj komencis rakonti al li la historion de siaj aventuroj de kiam ili forlasis Hobiturbon. Ili progresis ne tre klarorde, ĉar ili senĉese interrompis unu la alian, kaj Arbobarbo ofte haltigis parolanton kaj reiris al iu pli frua punkto, aŭ saltis antaŭen demandante pri postaj okazaĵoj. Ili tute nenion diris pri la Ringo kaj ne sciigis al li, kial ili ekvojaĝis, nek kien ili iras, kaj li ne petis kialojn.

Lin ege interesis ĉio: la nigraj rajdantoj, Elrondo kaj Rivendelo, la Malnova Arbaro kaj Tom Bombadiljo, la minejoj de Morio, Lotlorieno kaj Galadriela. Li devigis ilin ĉiam denove priskribi la Provincon kaj ties terenon. Tiupunkte li diris ion strangan:

— Vi neniam vidas iujn, hm, iujn entojn en tiu regiono, ĉu? — li demandis. — Nu, ne entojn, mi prefere devus diri *entedzinojn*.

— *Entedzinojn*? — diris Grinĉjo. — Ĉu ili entute similas vin?

— Jes, hm, nu ne: mi jam ne vere scias, — diris Arbobarbo penseme. — Sed ili ŝatus vian landon, do mi nur scivolis.

Arbobarbo tamen aparte interesiĝis pri ĉio koncerne Gandalfon; kaj plej interesiĝis pri la faroj de Sarumano. La hobitoj tre bedaŭris, ke ili sciis tiel malmulte pri ili: nur iom malprecizan raporton de Sam pri tio, kion Gandalfo diris al la Konsiliĝo. Sed ili almenaŭ sciis klare, ke Ugluko kaj ties trupo devenis de Isengardo kaj parolis pri Sarumano kiel pri sia mastro.

— Hm, hum! — diris Arbobarbo, kiam fine ilia historio serpentumis kaj

alvagis ĝis la batalo inter la orkoj kaj la rajdistoj de Rohano. — Nu, nu! Jen amaso da novaĵoj tute sendube. Vi ne sciigis al mi ĉion, vere ne, nur proksimume. Sed mi ne dubas, ke vi faras tion, kion dezirus Gandalfo. Okazas io tre grava, tion mi povas kompreni, kaj kio ĝi estas, mi eble ekscios ĝustatempe, aŭ malĝustatempe. Je radiko kaj branĉeto, sed tio estas stranga afero: ekŝosas eta popolo, kiu ne estas sur la malnovaj listoj, kaj jen! reaperas la Naŭ forgesitaj Rajdantoj por persekuti ilin, kaj Gandalfo gvidas ilin dum longa vojaĝo, kaj Galadriela gastigas ilin en Karas Galadono, kaj orkoj persekutas ilin tra ĉiuj mejloj de Sovaĝlando: efektive ili ŝajnas trafitaj de ŝtormego. Mi esperas, ke ili travivos ĝin!

— Kaj kio pri vi mem? — demandis Gaja.

— Hum, hm, mi ne ĝenis min pri la Grandaj Militoj, — diris Arbobarbo, — tiuj plejparte koncernas elfojn kaj homojn. Tio estas okupiĝo de sorĉistoj: sorĉistoj ĉiam zorgas pri la estonteco. Al mi ne plaĉas zorgi pri la estonteco. Mi ne tute troviĝas je ies *flanko*, ĉar neniu tute troviĝas je mia *flanko*, se vi min komprenas: neniu zorgas pri la arbaroj tiom, kiom mi prizorgas ilin, eĉ ne elfoj nuntempe. Tamen mi pli simpatias kun elfoj ol kun aliaj: ĝuste la elfoj kuracis nian mutecon antaŭlonge, kaj tio estis granda komplezo neniam forgesinda, kvankam niaj vojoj disiĝis intertempe. Kaj ekzistas kompreneble aferoj je kies flanko mi tute ne estas; mi tute kontraŭas ilin: tiuj *burárum*, — li denove eligis profundan murmuregon de abomeno, — tiuj orkoj kaj ties mastroj.

» Mi siatempe maltrankvilis, kiam la ombro kuŝis sur Mornarbaro, sed kiam ĝi translokiĝis al Mordoro, mi dum kelka tempo ne zorgis: Mordoro estas tre malproksime. Sed ŝajnas, ke la vento turniĝas el la oriento kaj eble proksimiĝas la ŝrumpado de ĉiuj arbaroj. Nenion povas fari maljuna ento por rezisti tiun ŝtormon: li devas aŭ travivi ĝin aŭ dissplitiĝi.

» Sed nun Sarumano! Sarumano estas najbaro: mi ne povas preteratenti lin. Ion mi devas fari, supozeble. Mi ofte scivolis lastatempe, kion fari pri Sarumano.

— Kiu estas Sarumano? — demandis Grinĉjo. — Ĉu vi scias ion pri lia historio?

— Sarumano estas sorĉisto, — respondis Arbobarbo. — Pli ol tion mi ne povas diri. Mi ne konas la historion de sorĉistoj. Ili unue aperis post kiam la grandaj ŝipoj venis el trans la maro; sed ĉu ili venis kun la ŝipoj, mi neniam povis decidi. Sarumano kredeble estis alte taksata inter ili. Li ĉesis disvagadi kaj okupiĝi pri la aferoj de homoj kaj elfoj antaŭ iom da tempo — vi taksus tion antaŭ tre longa tempo; kaj li establiĝis en Angrenosto, aŭ Isengardo, kiel nomas ĝin la homoj el Rohano. Komence li estis tre kvieta, sed lia famo komencis kreski. Oni elektis lin ĉefo de la Blanka Konsilio,

laŭdire; sed tio ne elturniĝis tre bone. Mi nun scivolas, ĉu eĉ tiam Sarumano ekturnis sin al misagado. Sed ĉiuokaze li tiam ne ĝenis siajn najbarojn. Mi kutimis paroli al li. Siatempe li ĉiam trapromenis miajn arbarojn. En tiuj tagoj li estis ĝentila, ĉiam petante mian permeson (almenaŭ kiam li renkontis min); kaj ĉiam aŭskultis entuziasme. Mi sciigis al li multajn aferojn kiujn li neniam malkovrus proprapene; sed li neniam repagis al mi per similaĵoj. Mi ne memoras, ke li iam sciigis al mi ion ajn. Kaj tia li ĉiam pli iĝis; lia vizaĝo, kiel mi ĝin memoras — ĉar jam delonge mi ne vidis ĝin — eksimilis fenestrojn sur ŝtona muro: fenestrojn kun ŝutroj interne.

» Mi opinias nun kompreni kiel li okupiĝas. Li komplotas fariĝi Potenco. Li havas menson el metalo kaj radoj; kaj li ne zorgas pri kreskaĵoj krom tiugrade, ke ili momente servas al li. Kaj jam estas klare, ke li estas nigra perfidulo. Li kunuliĝis kun naŭzuloj, kun la orkoj. Brm, hum! Eĉ pli malbone: li faris ion al ili, ion danĝeran. Ĉar tiuj isengardanoj pli similas misajn homojn. Estas trajto de misaĵoj venintaj dum la Granda Mallumo, ke ili ne toleras la sunlumon; sed la orkoj de Sarumano kapablas toleri ĝin malgraŭ tio, ke ili malamas ĝin. Mi scivolas, kion li faris? Ĉu ili estas homoj, kiujn li ruinigis, aŭ ĉu li kunfandis la rasojn orkan kaj homan? Tio estus nigra malvirtaĵo!

Arbobarbo grumblis momente, kvazaŭ li prononcus profundan subteran entan malbenon.

— Antaŭ kelka tempo mi komencis scivoli, kiel orkoj aŭdacis tiel senĝene trapasi miajn arbarojn, — li daŭrigis. — Nur lastatempe mi konjektis, ke kulpas Sarumano, kaj ke antaŭlonge li elspionis ĉiujn vojojn kaj malkovris miajn sekretojn. Li kaj lia fia popolo jam kreas ĥaoson. Tie ĉe la randoj ili faligas arbojn, bonajn arbojn. Iujn el la arboj ili nur detranĉas kaj lasas putri — jen orka misfaro; sed la plimultaj estas dishakitaj kaj forportitaj por nutri la fajrojn de Ortanko. Ĉiam leviĝas fumo el Isengardo nuntempe.

» Damnu lin je radiko kaj branĉo! Multaj el tiuj arboj estis miaj amikoj, kreitoj, kiujn mi konis ekde nukso kaj glano; multaj posedis proprajn voĉojn, kiuj jam perdiĝis por ĉiam. Kaj vidiĝas dezertoj kun stumpoj kaj rubusoj, kie iam troviĝis kantantaj boskoj. Mi maldiligentis. Mi malatentis aferojn. Tio devas ĉesi!

Arbobarbo abrupte levis sin de sia lito, stariĝis kaj batis per sia mano la tablon. La lumujoj tremis kaj eligis du ŝprucojn da flamo. En liaj okuloj estis flagro kvazaŭ verda fajro, kaj lia barbo hirtiĝis rigida kiel granda balailo.

— Mi ĉesigos tion! — li muĝis. — Kaj vi akompanos min. Vi eble povos helpi min. Tiel vi helpos ankaŭ la proprajn amikojn; ĉar se Sarumano

ne estos haltigita, Rohano kaj Gondoro havos malamikon tiel malantaŭe, kiel antaŭe. Niaj vojoj koincidas — al Isengardo!

— Ni akompanos vin, — diris Gaja. — Ni faros laŭ nia povo.

— Jes! — diris Grinĉjo. — Plaĉus al mi vidi pereigon de l' Blanka Mano. Plaĉus al mi ĉeesti, eĉ se mi ne multe utilus: mi neniam forgesos Uglukon kaj la transiron de Rohano.

— Bone! Bone! — diris Arbobarbo. — Sed mi parolis haste. Ni devas ne hasti. Mi iĝis tro varma. Mi devas friskigi min kaj pensi, ĉar pli facile oni krias "ĉesu!" ol ĉesas.

Li paŝis al la arko kaj staris kelkan tempon sub la falanta pluvo de l' fonto. Poste li ridis kaj skuis sin, kaj kie ajn la akveroj falis flagrete de li al la tero, ili ekbrilis kiel ruĝaj kaj verdaj flameroj. Li revenis kaj rekuŝiĝis sur la liton kaj silentis.

Post iom da tempo la hobitoj aŭdis lin denove murmuranta. Li ŝajnis kalkuli per siaj fingroj.

— Fangorno, Finglaso, Fladrifo, jes, jes, — li suspiris. — Problemo estas, ke tiel malmultaj el ni postrestas, — li diris, turniĝante al la hobitoj. — Restas nur tri el la unuaj entoj, kiuj promenis en la arbaroj antaŭ la Mallumo: nur mi mem, Fangorno, kaj Finglaso kaj Fladrifo — se doni al ili la elfajn nomojn; vi rajtas nomi ilin Folikluzo kaj Haŭtŝelo, se tio pli plaĉas al vi. Kaj el ni tri Folikluzo kaj Haŭtŝelo ne multe utilas por tiu ĉi afero. Folikluzo iĝis dormema, preskaŭ arbeca, oni povus diri: li jam kutimas stari izolite duondorme tra la tuta somero kun la densa herbo de la gresejoj ĉirkaŭ la genuoj. Kovrita de foliecaj haroj li estas. Antaŭe li vigliĝis en la vintro; sed lastatempe li tro dormemis por marŝi longdistance eĉ tiam. Haŭtŝelo loĝis sur la montdeklivoj okcidente de Isengardo. Tie okazis la plej seriozaj perturboj. Lin vundis orkoj, kaj multaj el lia popolo kaj liaj arbgregoj estas murditaj kaj detruitaj. Li supreniris sur la altaĵojn, inter la betuloj, kiujn li plej amas, kaj li rifuzas descendi. Tamen mi verŝajne povus kunigi bravan grupon de niaj pli junaj personoj — se mi sukcesus komprenigi al ili la neceson; se mi sukcesus vigligi ilin: ni ne estas popolo hastema. Kiel domaĝe, ke ni estas tiel malmultaj!

— Kial ekzistas tiel malmultaj, dum vi vivis tiom longe en tiu ĉi lando? — demandis Grinĉjo. — Ĉu tre multaj mortis?

— Ho ne! — diris Arbobarbo. — Neniuj mortis de interne, kiel oni eble dirus. Iuj falis pro la misaj hazardoj de la longaj jaroj, kompreneble; kaj pli multaj iĝis arbecaj. Sed ni neniam estis multaj, kaj ni ne plimultiĝis. Estis neniom da entidoj — neniom da infanoj, oni povus diri, jam de terure longa jarkalkulo. Vidu, ni perdis la entedzinojn.

— Kiom vere triste! — diris Grinĉjo. — Kiel okazis, ke ili ĉiuj mortis?

— Ili ne *mortis*! — diris Arbobarbo. — Mi ja ne diris *mortis*. Ni perdis ilin, mi diris. Ni perdis ilin, kaj ni ne povas retrovi ilin. — Li ĝemspiris. — Mi supozis, ke la plimulto scias tion. Oni kantis kantojn pri la serĉado de la entoj por la entedzinoj inter elfoj kaj homoj de Mornarbaro ĝis Gondoro. Ne povas esti, ke tiuj estas tute forgesitaj.

— Bedaŭrinde la kantoj ne venis okcidenten trans la Montaron ĝis la Provinco, — diris Gaja. — Ĉu vi ne volos rakonti pli, aŭ kanti al ni unu el la kantoj?

— Jes, tion mi certe faros, — diris Arbobarbo, verŝajne kontenta pri la peto. — Sed mi ne povos rakonti ĝin ĝuste, nur resume; kaj poste ni devos ĉesigi nian interparolon: morgaŭ ni devos konsiliĝon kunvoki, kaj laboron fari, kaj eble komenci vojaĝon.

— Ĝi estas historio stranga kaj malĝoja, — li daŭrigis post paŭzo. — Kiam la mondo estis juna, kaj la arbaroj estis larĝaj kaj sovaĝaj, la entoj kaj la entedzinoj — kaj tiam estis entvirgulinoj: ha! la belo de Fimbretila, de Vergmembra la leĝerpieda, dum la epoko de nia juneco! — ili promenis kune, kaj ili loĝis kune. Sed niaj koroj ne kreskis sammaniere: la entoj donis sian amon al aĵoj, kiujn ili renkontis en la mondo, kaj entedzinoj direktis siajn pensojn al aliaj aferoj, ĉar la entoj amis la grandajn arbojn, sovaĝajn arbarojn, kaj la deklivojn de l' altaj montoj; kaj ili trinkis el la montaraj rojoj kaj manĝis nur tiajn fruktojn, kiajn la arboj lasis fali sur la padon; kaj ili lernis de la elfoj kaj interparolis kun la arboj. Sed la entedzinoj direktis siajn mensojn al la arboj pli malgrandaj kaj al la herbkampoj en la sunlumo trans la subo de l' arbaroj; kaj ili vidis la prunelojn en la densejoj kaj la sovaĝajn pomojn kaj la ĉerizojn florantajn en la printempo kaj la verdajn plantaĵojn en la akvejoj somere kaj la semantajn herbojn en la aŭtunaj kampoj. Ili ne deziris interparoli kun tiuj aĵoj; sed ili volis, ke tiuj aŭskultu kaj obeu tion, kio estis al ili dirita. La entedzinoj ordonis, ke ili kresku laŭ ilia volo kaj elpuŝu foliojn kaj fruktojn laŭ ilia plaĉo; ĉar la entedzinoj deziris ordon, abundon kaj pacon (per kio ili intencis, ke la aĵoj restu tie, kie ili lokis ilin). Do la entedzinoj kreis ĝardenojn por enloĝado. Sed ni entoj daŭre vagadis, kaj nur de tempo al tempo ni venis al la ĝardenoj. Poste, kiam venis la Mallumo en la nordo, la entedzinoj transiris la Grandan Riveron kaj kreis novajn ĝardenojn kaj kultivis novajn kampojn, kaj ni vidis ilin malpli ofte. Post la forigo de la Mallumo la lando de la entedzinoj riĉe burĝonis, kaj iliaj kampoj estis plenaj de tritiko. Multaj homoj lernis la metiojn de la entedzinoj kaj ege honoris ilin; sed ni estis por ili nura legendo, sekreto en la kerno de l' arbaro. Tamen jen ni ankoraŭ ĉi tie, dum la ĝardenoj de la entedzinoj estas dezertigitaj: la homoj nun nomas tion la Brunaj Terenoj.

» Mi memoras, ke okazis antaŭ tre longe — en la epoko de la milito inter Saŭrono kaj la homoj de l' Maro — trafis min deziro denove vidi Fimbretilan. Tre bela ŝi ankoraŭ ŝajnis, kiam mi lastfoje vidis ŝin, kvankam malmulte simila al la iama entvirgulino. Ĉar la entedzinoj estis kurbaj kaj brunigitaj pro la laboro; la haroj sekigitaj de la suno ĝis koloro de matura tritiko kaj la vangoj kvazaŭ ruĝaj pomoj. Tamen iliaj okuloj estis daŭre la okuloj de nia popolo. Ni transiris Anduinon kaj venis en ilian landon; sed ni trovis ĝin dezerto: ĝi estis tute bruligita kaj elradikita, ĉar milito trapasis ĝin. Sed la entedzinoj ne estis tie. Longe ni vokis kaj longe ni serĉis; kaj ni demandis al ĉiuj renkontitoj, laŭ kiu vojo foriris la entedzinoj. Iuj diris, ke ili ne vidis ilin; kaj iuj diris, ke ili vidis ilin promenantaj okcidenten, kaj iuj diris orienten, kaj aliaj suden. Sed kien ajn ni iris, ni ne trovis ilin. Nia malĝojo estis tre profunda. Tamen vokis la sovaĝaj arbaroj kaj tien ni reiris, ĉar dum tre multaj jaroj ni kutimis de tempo al tempo eliri kaj serĉi la entedzinojn, marŝante vaste kaj larĝe kaj vokante ilin laŭ iliaj belaj nomoj. Sed dum la tempopasado ni iris pli malofte kaj vagis malpli foren. Kaj nun la entedzinoj estas por ni nuraj memoraĵoj kaj niaj barboj estas longaj kaj grizaj. La elfoj verkis multajn kantojn pri la Serĉado de la entoj kaj kelkaj kantoj transiris sur la langojn de homoj. Sed ni ne verkis kantojn tiuteme, ĉar sufiĉis al ni ĉanti iliajn belajn nomojn, kiam ni pensis pri la entedzinoj. Ni kredas, ke ni eble renkontiĝos denove en venonta tempo, kaj eble ni trovos ie landon, kie ni povos vivi kune kaj esti ambaŭ kontentaj. Sed estas aŭgurite, ke tio okazos nur kiam ni ambaŭ perdos ĉion, kion ni nun posedas. Kaj tre povas esti, ke tiu tempo finfine proksimiĝas. Ĉar se la praa Saŭrono detruis la ĝardenojn, ŝajnas probable, ke la hodiaŭa Malamiko velkigos ĉiujn arbarojn.

» Ekzistis elfa kanto, kiu priparolis tion, aŭ tiel mi komprenas ĝin. Ĝi kutime estis kantata ie-tie laŭlonge de la Granda Rivero. Tio neniam estis kanto enta, vidu: ĝi estus tre longa kanto en la enta lingvo! Sed ni konas ĝin parkere kaj zumas ĝin de tempo al tempo. Jen kiel ĝi sonas en via lingvo:

Ento:

Kiam printempo fagojn vekas, kaj en la branĉoj sukas,
kiam sovaĝa rojo lumas, kaj fruntojn vent' viŝtukas
en temp' longpaŝa, projundspira, kaj akras mont-aero,
revenu al mi! Venu diri, ke belas mia tero!

Entedzino:

Kiam printempas la kamparo, kaj oni semas grenon,
kiam majfloroj neĝobrile surkuŝas frukt-terenon,

kiam la suno kaj pluvetoj parfumas en l' aero,
mi restos kaj ne venos mi, ĉar belas mia tero.

Ento:

Kiam surmondas la somero kaj en tagmez' orplonĝa
por arboj disvolviĝas subfolie sorĉo sonĝa
en verdaj haloj, kaj la vent' el okcidento fonas:
revenu al mi! Venu diri, ke mia ter' plej bonas!

Entedzino:

Kiam somer' varmigas fruktojn, kaj bruniĝas beroj,
kaj blankas spikoj, oras pajlo, vendiĝas rikolteroj:
miel' kaj pomoj, kvankam vent' el okcidento fonas
mi sub la sun' ĉi tie restos, ĉar mia ter' plej bonas!

Ento:

Kiam sovaĝa vintro venos, kiu l' arbaron tranĉas,
kaj falas arboj, kaj la tagon senstela nokt' formanĝas,
kiam el oriento ventas, tiam en pluv' seneje
mi serĉos vin kaj vokos vin kaj al vi venos ree!

Entedzino:

Kiam kantfine en malhelo estos vintra veno,
kiam rompiĝis nuda branĉ' kaj pasis lum' kaj peno,
mi serĉos vin, atendos vin, ĝis ni kuniĝos ree
kaj kune iros laŭ la vojo tra la pluv' seneje.

Ambaŭ:

Ni kune iros laŭ la vojo al la okcidento,
kaj malproksime trovos landon de la korkontento.

Arbobarbo finis sian kanton.

— Tia ĝi estas, — li diris. — Ĝi estas elfa kompreneble: malpezkora, hastvorta, kaj baldaŭ finita. Mi supozas, ke ĝi estas sufiĉe bela. Sed la entoj povus diri pli siaflanke, se ili disponus la tempon! Sed nun mi intencas stariĝi kaj dormi iom. Kie vi staros?

— Ni kutimas kuŝiĝi por dormi, — diris Gaja. — Ni fartos bone, kie ni estas.

— Ĉu kuŝiĝi por dormi! — diris Arbobarbo. — Nu kompreneble tiel! Hm, hum: mi forgesis: kantado de tiu kanto memorigis min pri malnovaj epokoj; mi preskaŭ supozis ke mi alparolas junajn entidojn, fakte. Nu, vi

povos kuŝi sur la lito. Mi iras stari sub la pluvo. Bonan nokton!

Gaja kaj Grinĉjo grimpis sur la liton kaj kurbe kuŝiĝis inter la molaj herboj kaj filikoj. Tie estis freŝe kaj dolĉarome kaj varme. La lumoj malfortiĝis kaj la ardo de l' arboj fadis; sed ekstere sub la arko ili vidis maljunan Arbobarbon staranta senmove kun la brakoj levitaj super la kapon. La helaj steloj rigardis desur la ĉielo kaj lumigis la falantan akvon verŝiĝantan sur liajn fingrojn kaj kapon kaj gutis, gutetis per centopaj arĝentaj akveroj al liaj piedoj. Aŭskultante la tintadon de l' akveroj la hobitoj endormiĝis.

Ili vekiĝis trovante friskan sunon, kiu brilis en la grandan korton kaj sur la fundon de la golfeto. Ĉifonoj de alta nubo estis supre drivantaj laŭ forteta orienta vento. Arbobarbo estis nenie videbla; sed dum Gaja kaj Grinĉjo banis sin en la apudarka baseno, ili aŭdis lin zumi kaj kanti suprenvenante laŭ la pado inter la arboj.

— Hu, ho! Bonan matenon, Gaja kaj Grinĉjo! — li muĝis vidinte ilin. — Vi dormas longe. Mi jam iris plurcent paŝojn hodiaŭ. Nun ni trinkos iom kaj iros al Entmuteo.

Li verŝis por ili el ŝtona vazo du plenajn bovlojn, sed el malsama vazo. La gusto ne estis tia, kia ĝi estis la antaŭan vesperon: ĝi estis pli tereca kaj riĉa, pli nutra kaj manĝaĵsimila, por tiel diri. Dum la hobitoj trinkis sidante ĉe la litrando kaj mordetante pecetojn da elfa kuko (pli pro tio, ke ili sentis, ke manĝado estas necesa parto de la matenmanĝo, ol ĉar ili estis malsataj), Arbobarbo staris zumante en la enta aŭ la elfa aŭ iu fremda lingvo kaj rigardis la ĉielon.

— Kie estas Entmuteo? — Grinĉjo riskis demandi.

— Hu, he? Ĉu Entmuteo? — diris Arbobarbo sin turnante. — Ĝi estas ne loko, ĝi estas kunveno de entoj — kio ne okazas ofte nuntempe. Sed mi sukcesis persvadi sufiĉe grandan aron promesi, ke ili venos. Ni renkontiĝos tie, kie ni ĉiam renkontiĝis: Derndinglo nomas ĝin la homoj. Ĝi estas fore suda de ĉi tie. Ni devas alveni antaŭ la tagmezo.

Postnelonge ili ekiris. Arbobarbo portis la hobitojn sur siaj brakoj kiel pasinttage. Ĉe la elirejo de la korto li turniĝis dekstren, transpaŝis la rojon, kaj paŝegis suden ĉesube de grandaj falintaj deklivoj, kie arboj maloftis. Supre de tiuj la hobitoj vidis densejojn betulajn kaj sorpujajn, kaj post tiuj malhelajn suprenirantajn pinarbarojn. Baldaŭ Arbobarbo sin turnis iomete for de la montetoj kaj plonĝis en densajn boskojn, kie la arboj estis pli grandaj, pli altaj kaj pli densaj ol la arboj, kiujn la hobitoj vidis iam antaŭe. Dum kelka tempo ili malforte spertis tiun senton de sufokiĝo, kiun ili rimarkis, kiam ili la unuan fojon eniris Fangornon, sed tio baldaŭ pasis. Arbobarbo ne parolis al ili. Li zumis al si profunde kaj penseme, sed Gaja kaj Grinĉjo aŭdis neniujn efektivajn vortojn: tio sonis kiel *bum, bum, rumbum, burar, bum bum, darar bum bum, darar bum*, kaj tiel plu kun konstanta ŝanĝiĝo de notoj kaj ritmo. De tempo al tempo ŝajnis al ili, ke ili aŭdas respondon, ian zumon aŭ vibron de sono, kiu ŝajnis veni el la tero, aŭ el la branĉoj super iliaj kapoj, aŭ eble el la trunkoj de la arboj; sed Arbobarbo nek haltis nek turnis sian kapon flanken.

Ili vojaĝis longe — Grinĉjo provis kalkuli la "ent-paŝojn", sed malsukcesis, perdiĝinte ĉirkaŭ tri mil — kiam Arbobarbo komencis malrapidigi siajn paŝojn. Subite li haltis, demetis la hobitojn kaj levis siajn kavigitajn manojn al la buŝo tiel, ke ili formis kavan tubon; poste li blovis aŭ vokis tra ili. Granda *hum hom* elsonoris kvazaŭ profundgorĝa korno en la arbaro kaj ŝajnis reeĥi de la arboj. De malproksime venis el pluraj direktoj simila *hum hom*, kiu estis ne eĥo, sed respondo.

Arbobarbo sidigis Gajan kaj Gringon sur siajn ŝultrojn kaj denove ekpaŝegis, de tempo al tempo eligante novan kornovokon, kaj ĉiufoje la respondoj estis pli laŭtaj kaj pli proksimaj. Tiamaniere ili finfine venis al io, kio aspektis kiel nepenetrebla muro de malhelaj ĉiamverdaj arboj, kiajn la hobitoj neniam antaŭe vidis: tiuj branĉiĝis jam de la radikoj kaj estis dense vestitaj per malhelaj glaceaj folioj kvazaŭ sendornaj ileksoj, kaj ili havis multajn rigidajn rekte starantajn florpintojn kun grandaj brilaj olivkoloraj burĝonoj.

Turniĝinte maldekstren kaj laŭirinte tiun heĝegon Arbobarbo venis post kelkaj paŝoj al mallarĝa enirejo. Tra ĝi pasis trivita pado kiu subite plonĝis laŭ longa apika deklivo. La hobitoj vidis, ke ili descendas al granda kavaĵo, ronda preskaŭ kiel bovlo, tre larĝa kaj profunda, kronita ĉe la rando per la alta malhela ĉiamverda heĝego. Interne ĝi estis glata kaj herbvestita, kaj malestis arboj krom tri tre altaj kaj belaj arĝent-betuloj, kiuj staris funde de la bovlo. Du aliaj padoj kondukis en la kavaĵon de l' okcidento kaj de la oriento.

Pluraj entoj estis jam alvenintaj. Pliaj venis sur la aliaj padoj kaj kelkaj jam sekvis Arbobarbon. Dum ili proksimiĝis, la hobitoj gvatis ilin. Ili atendis vidi nombron da kreitoj tiel similaj al Arbobarbo, kiel unu hobito similas alian (almenaŭ laŭ okulo de fremdulo); kaj ili tre surpriziĝis vidante nenion tian. La entoj tiom malsimilis unu alian, kiom arboj arbojn: iuj tiom malsimilaj inter si, kiom unu arbo malsimilas alian kun sama nomo, sed tute aliaj kreskiĝo kaj historio; kaj iuj tiom diferencaj, kiom unu arbospeco de alia, kiel betulo de fago, kverko de abio. Estis kelkaj entoj pli maljunaj, barbohavaj kaj tuberozaj kiel arboj sanaj sed antikvaj (kvankam neniu el ili aspektis tiom antikva kiom Arbobarbo); kaj estis altaj fortaj entoj junmembraj kaj glathaŭtaj kiel vivzenitaj arbaranoj; sed mankis junaj entoj, mankis arbidoj. Entute ĉirkaŭ dudek kvar staris sur la larĝa herba fundo de la kavaĵo, kaj tiom multaj aliaj enmarŝadis.

Komence Gajan kaj Grinĉjon impresis ĉefe la varieco, kiun ili vidis: la multaj formoj kaj koloroj, la diferencoj de zonmezuro kaj alteco, la longeco de kruroj kaj brakoj, la nombro de fingroj sur la manoj kaj piedoj (iom inter tri ĝis naŭ). Kelkaj ŝajnis pli-malpli parencaj al Arbobarbo kaj memorigis al ili betulojn aŭ kverkojn. Sed estis alispecaj. Iuj revokis kaŝtanarbon: brunhaŭtaj entoj kun larĝaj disfingraj manoj kaj mallongaj dikaj kruroj. Iuj revokis fraksenon: altaj rektaj grizaj entoj kun multfmgraj manoj kaj longaj kruroj; iuj abion (la plej altaj entoj), kaj aliaj betulon, sorpujon kaj tilion. Sed kiam la entoj ĉiuj ĉirkaŭstaris Arbobarbon, iomete klinante siajn kapojn, murmurante per siaj lantaj muzikaj voĉoj, kaj rigardante longe kaj atente la fremdulojn, tiam la hobitoj vidis, ke ili estas ĉiuj samspecaj kaj ĉiuj havas samajn okulojn, ne ĉiuj tiel oldaj aŭ profundaj kiel tiuj de Arbobarbo, sed ĉiuj kun tiu sama lanta sendevia pensema esprimo kaj la sama verda flagro.

Tuj kiam la tuta trupo kunvenis en larĝa cirklo ĉirkaŭ Arbobarbo, komenciĝis stranga kaj nekomprenebla konversacio. La entoj komencis murmuri malrapide: jen unu aliĝis, poste alia, ĝis ĉiuj kune ĉantis laŭ longa ritmo leviĝanta kaj subiranta, jen pli laŭte unuflanke de la ringo, jen tie formortante kaj leviĝante al muĝego aliflanke. Kvankam li povis nek distingi nek kompreni la vortojn — li supozis, ke la lingvo estas la enta — Grinĉjo komence trovis la sonon tre agrable aŭskultinda; sed iom post iom lia atentemo ekvelkis. Post longa tempo (kaj la ĉantado ne donis signon pri ĉesemo) li konstatis sin scivolanta, ĉu pro tio ke la enta estas tia “malhasta” lingvo ili jam progresis post *Bonan matenon*; kaj se Arbobarbo volus nomumi ĉiujn, kiom da tagoj necesus por kanti ĉiujn nomojn. “Mi scivolas kiel oni diras entlingve *jes* kaj *ne*”, — li pensis. Li oscedis. Arbobarbo tuj atentis lin.

— *Hm, ha, hej*, Grinĉjo mia! — li diris, kaj la ceteraj entoj ĉesigis sian ĉantadon. — Vi estas popolo hastema, tion mi forgesis; kaj ĉiuokaze estas lacige aŭskulti parolon, kiun vi ne komprenas. Vi rajtas nun alteriĝi. Mi sciigis al la Entmuteo viajn nomojn, kaj ili vidis vin, kaj ili konsentis, ke vi ne estas orkoj, kaj ke nova verso estu inkluzivita en la malnovaj listoj. Ni ankoraŭ ne progresis pli, sed tio estas rapida laboro en Entmuteo. Vi kaj Gaja rajtas ĉirkaŭpromeni en la kavaĵo, se vi volas. Troviĝas puto da bona akvo, se vi bezonas refreŝiĝon, tie fore ĉe la norda deklivo. Ankoraŭ parolotas kelkaj vortoj, antaŭ ol la Entmuteo vere komenciĝos. Mi venos vidi vin denove kaj rakontos, kiel progresas la aferoj.

Li demetis la hobitojn. Antaŭ ol formarŝi ili profunde riverencis. Tiu faro ŝajnis amuzi tre multe la entojn, se juĝi laŭ ties murmuroj kaj la flagrado de la okuloj; sed ili baldaŭ reiris al la propraj aferoj. Gaja kaj Grinĉjo supreniris la padon venantan el la okcidento kaj trarigardis la apertaĵon en la heĝego. Longaj arbokovritaj deklivoj leviĝis de la rando de l' kavaĵo, kaj malproksime super la abioj de l' plej fora firsto leviĝis akra kaj blanka pinto de alta monto. Sude maldekstre ili povis vidi la arbaron descendi al griza malproksimo. Tie fore estis pala verda briletaĵo, kiu laŭ konjektoj de Gaja estis ekvido de l' ebenaĵoj de Rohano.

— Mi scivolas, kie estas Isengardo? — diris Grinĉjo.

— Mi ne tute certas, kie ni estas, — diris Gaja; — sed tiu monto estas probable Metedraso, kaj, se mi bone memoras, la ringo de Isengardo kuŝas en forkejo aŭ profunda fendaĵo je la ekstremo de l' montaro. Ĝi estas probable sube post tiu ĉi granda firsto. Ŝajnas troviĝi ia fumo aŭ nebuleto tie, maldekstre de la pinto, ĉu vi ne opinias?

— Kia estas Isengardo? — diris Grinĉjo. — Mi scivolas, kion kapablas entoj fari pri ĝi ĉiuokaze.

— Ankaŭ mi, — diris Gaja. — Isengardo estas ia ringo el rokoj aŭ montoj, mi kredas, kun ebena loko interne kaj insulo aŭ pilastro el roko meze, nomita Ortanko. Sur ĝi Sarumano havas turegon. Troviĝas pordo, eble pli ol unu, en la ĉirkaŭa muro, kaj mi opinias, ke trafluas ĝin rivereto; ĝi venas el la montaro kaj fluadas plu tra la Breĉo de Rohano. Ĝi ne ŝajnas loko, kiun entoj kapablas trakti. Sed mi strange sentas pri ĉi entoj: ial mi ne kredas, ke ili estas tiel sendanĝeraj kaj, nu, ridindaj, kiel ili ŝajnas. Ili ŝajnas lantaj, kuriozaj kaj paciencaj, preskaŭ tristaj; kaj tamen mi kredas, ke ili *povus* agitiĝi. Se tio okazus, mi preferus ne esti inter la kontraŭuloj.

— Jes, — diris Grinĉjo. — Mi scias, kion vi celas diri. Eble temus pri diferenco inter maljuna bovino kuŝanta kaj penseme remaĉanta kaj taŭro impetiĝanta; kaj la ŝanĝiĝo povus okazi subite. Mi scivolas, ĉu Arbobarbo agitos ilin. Mi certas, ke li intencas provi. Sed al ili ne plaĉas agitiĝi.

Arbobarbo mem agitiĝis hieraŭ vespere, kaj poste subpremis tion.

La hobitoj returniĝis. La voĉoj de la entoj daŭre leviĝis kaj subeniĝis en ilia konklavo. La suno jam supreniris sufiĉe alten por transrigardi la heĝegon: ĝi brilis sur la suproj de la betuloj kaj lumigis la nordan flankon de la kavaĵo per friska flava lumo. Tie ili vidis etan ekbrilan fonton. Ili marŝis laŭ la rando de l' bovlego sube de l' ĉiamverdaĵoj — estis agrable senti denove malvarmetan herbon ĉirkaŭ la piedfingroj kaj ne rapidemi — kaj poste ili degrimpis al la sputanta akvo. Ili trinkis iomete puran malvarman akran gluton, kaj sidiĝis sur muskokovritan ŝtonon rigardante la sunlumerojn sur la herbo kaj la ombrojn de l' velantaj nuboj pasantajn sur la fundo de la kavaĵo. La murmurado de la entoj daŭradis. Tiu loko ŝajnis tre stranga kaj izolita, ekster ilia mondo kaj malproksime de ĉio okazinta al ili. Envolvis ilin granda sopiro pri la vizaĝoj kaj voĉoj de iliaj kunuloj, precipe pri Frodo kaj Sam, kaj pri Paŝegulo.

Finfine okazis paŭzo de la entaj voĉoj; kaj levante la kapojn ili vidis Arbobarbon venanta al ili kun alia ento ĉeflanke.

— Hm, hum, jen mi denove, — diris Arbobarbo. — Ĉu vi laciĝis aŭ spertas senpacienciĝon, hmm, ha? Nu bedaŭrinde vi devas ankoraŭ ne senpacienciĝi. Ni jam kompletigis la unuan stadion, sed mi ankoraŭ devas reklarigi aferojn al tiuj, kiuj loĝas malproksime de Isengardo, kaj al tiuj, kun kiuj mi ne povis kontaktiĝi antaŭ la Entmuteo, kaj poste ni devos decidi kion fari. Tamen decido pri kion fari ne okupas la entojn tiel longe kiel rakonti la faktojn kaj okazaĵojn, laŭ kiuj ili devas decidiĝi. Sed ne havas sencon nei, ke ni restos ĉi tie iom longe: tre verŝajne du tagojn. Do mi venigis al vi kunulon. Li havas entan domon proksime. Bregalado estas lia elfa nomo. Li diras, ke li jam decidiĝis, kaj al li ne necesas resti ĉe la Entmuteo. Hm, hm, li estas plej simila inter ni al ento hastema. Vi sekve devus bone akordiĝi. Adiaŭ. — Arbobarbo turniĝis kaj forlasis ilin.

Bregalado staris kelkan tempon rigardante gravmiene la hobitojn; kaj ili rigardis lin, scivolante kiam li montros signojn de "hasteco". Li estis alta kaj ŝajnis esti unu el la pli junaj entoj; li havis sur la brakoj kaj kruroj haŭton glatan kaj briletan; liaj lipoj estis ruĝecaj, kaj lia hararo estis grizverda. Li povis kliniĝi kaj balanciĝi kiel svelta arbo pro la vento. Finfine li ekparolis, kaj lia voĉo, kvankam sonora, estis pli alta kaj pli klara ol tiu de Arbobarbo.

— Ha, hmm, miaj amikoj, ni iru promeni! — li diris. — Mi estas Bregalado, kio estas Rapidtrunko vialingve. Sed tio estas nur kromnomo, kompreneble. Oni tiel nomas min, de kiam mi diris *jes al pliaĝulo, antaŭ ol li kompletigis sian demandon. Cetere, mi trinkas rapide kaj foriras, dum iuj ankoraŭ malsekigas siajn barbojn. Venu kun mi*!

Li streĉis suben la du belformajn brakojn kaj donis po longfingran

manon al la hobitoj. La tutan tagon ili kunpromenis en la arbaro, kantante kaj ridante; ĉar Rapidtrunko ofte ridis. Li ridis kiam aperis la suno de post nubo, li ridis kiam ili alvenis rojon aŭ fonton: tiam li kliniĝis kaj malsekigis plaŭde siajn piedojn kaj kapon per akvo; li ridis kelkfoje pro ia bruo aŭ flustro inter arboj. Kiam ajn li vidis sorpujon li haltis kelkan tempon elstreĉinte siajn brakojn, kantis kaj balanciĝis dumkante.

Je noktiĝo li kondukis ilin al sia enta domo: nenio krom muskokovrita ŝtono starigita sur gazoneroj sub verda teramaso. Sorpujoj kreskis cirkle ĉirkaŭ ĝi, kaj troviĝis akvo (kiel en ĉiuj entaj domoj), fonto bobelanta el la teramaso. Ili interparolis kelkan tempon, dum mallumo kovris la arbaron. Ne malproksime la voĉoj de la Entmuteo estis ankoraŭ aŭdeblaj; sed nun tiuj ŝajnis pli profundaj kaj malpli lakonaj, kaj de tempo al tempo iu granda voĉo leviĝis en alta kaj rapidiĝanta muzikeco dum la aliaj forvelkis. Sed apud ili Bregalado parolis milde en ilia propra lingvo, preskaŭ flustre; kaj ili sciiĝis, ke li estas popolano de Haŭtŝelo, kaj la tereno, en kiu ili loĝis, estis perfortita. Tio ŝajnis al la hobitoj tute sufiĉe klarigi lian “rapidecon” almenaŭ rilate la orkojn.

— En mia hejmo estis sorpujoj, — diris Bregalado, mallaŭte kaj malĝoje, — sorpujoj, kiuj enradikiĝis kiam mi estis entido, antaŭ multaj multaj jaroj en la kvieto de la mondo. La plej maljunaj estis plantitaj de la entoj en provo komplezi la entedzinojn, sed tiuj rigardis ilin, ridetis kaj diris, ke ili scias, kie kreskas floraro pli blanka kaj fruktoj pli riĉaj. Tamen neniuj arboj el tiu raso, la popolo de la Rozo, tiom belas laŭ mi. Kaj tiuj arboj kreskis, kreskadis ĝis ĉies ombro similis verdan halon, kaj iliaj ruĝaj beroj en la aŭtuno estis ŝarĝo, belo kaj mirindaĵo. Birdoj kutimis veni tien multnombre. Mi ŝatas birdojn, eĉ kiam ili babilaĉas; kaj la sorpujoj disponas pli ol sufiĉe da beroj. Sed la birdoj iĝis neamikecaj kaj avidaj kaj ŝiris la arbojn, teren ĵetis la fruktojn kaj ne manĝis ilin. Poste venis orkoj kun hakiloj kaj fortranĉis miajn arbojn. Mi venis kaj vokis ilin laŭ iliaj longaj nomoj, sed ili ne vibris, ili nek aŭdis nek respondis: ili kuŝis mortintaj.

Ho Orofarna, Lasemista, Karnemirja!
Ho sorpoarbo, ĉe la hararo la floroj kiom blankis!
Ho aorpoarb, mi vin vidis ĉarmi, kiam somer’ ne mankis,
la ŝelo helis,folioj belis, tre mildis voĉa sono:
kaj jen surkape kiom tre frape or-ruĝis via krono!
Ho sorpoarboj, jam mortaj haroj sekas kaj grizas lame;
la kron’ kaputas, la voĉo mutas, silenta porĉiame.
Ho Orofarna, Lasemista, Karnemirja!

La hobitoj endormiĝis aŭdante la mallaŭtan kantadon de Bregalado, kiu

ŝajnis lamenti multlingve pri la pereo de la arboj, kiujn li amis.

Ankaŭ la postan tagon ili pasigis en lia societo, sed ili ne vagis malproksime de lia “domo”. La pliparton de la tempo ili sidis silente sub ŝirmo de la teramaso, ĉar la vento pli malvarmis, kaj la nuboj estis pli densaj kaj pli grizaj; malmultis la sunlumo, kaj malproksime la voĉoj de la entoj ĉe la Entmuteo plu leviĝis kaj subeniĝis, foje laŭtaj kaj fortaj, foje malaltaj kaj malĝojaj, foje pli rapidaj, foje malrapidaj kaj solenaj kiel mortkanto. Venis la dua nokto, kaj daŭre la entoj konklavis sub hastaj nuboj kaj intermitaj steloj.

La tria tago aŭroris malbela kaj ventoplena. Je sunleviĝo la entaj voĉoj leviĝis bruege kaj poste fordampiĝis denove. Kun pasado de la mateno, la vento malfortiĝis, kaj la aero iĝis atendeme peza. La hobitoj povis vidi, ke Bregalado aŭskultas atente, kvankam por ili en la kavaĵo de lia enta domo la sono de la Entmuteo mallaŭtis.

Venis la posttagmezo, kaj la suno, irante okcidenten al la montaro, elsendis longajn flavajn radiojn inter la fendetoj kaj truetoj de la nuboj. Subite ili konstatis, ke ĉio tre kvietas; staris la tuta arbaro en aŭskulta silento. Kompreneble, la entaj voĉoj ĉesis. Kion tio signifis? Bregalado estis staranta rekte kaj streĉite, rerigardante norden al Derndinglo.

Tiam aŭdiĝis krake kriego sonora: *ra-hum-ra*! La arboj vibris kaj kurbiĝis kvazaŭ ventobato trafus ilin. Sekvis alia paŭzo, kaj poste marŝmuziko komenciĝis kiel solenaj tamburoj, kaj super la ruliĝantaj taktoj kaj batoj ŝveliĝis voĉoj kantantaj alte kaj forte.

Ni venas kure kuntambure: ta-runda runda runda rure!
La entoj venis: ĉiam pli proksime kaj pli laŭte leviĝis ilia kanto:

Ni venas korne kaj tambure: ta runa-runa runa rure!

Bregalado levis la hobitojn kaj elpaŝis el sia domo.

Postnelonge ili vidis alproksimiĝi la marŝantan linion: la entoj svingiĝis antaŭen al ili grandpaŝe suben laŭ la deklivo. Arbobarbo antaŭis, kaj proksimume kvindek kunuloj sekvis lin po du egalpaŝe piede, batante la takton sur la koksoj per siaj manoj. Kiam ili alproksimiĝis, videblis la ekbriloj kaj flagroj en iliaj okuloj.

— Hum, hom! Jen ni venas kun eksplodo, jen ni venas finfine! — vokis Arbobarbo ekvidante Bregaladon kaj la hobitojn. — Venu, aliĝu al la Entmuteo! Ni ekiras. Ni ekiras al Isengardo!

— Al Isengardo! — la entoj kriis multvoĉe.

— Al Isengardo!

Al Isengardo! malgraŭ gardo de l’ ĉirkaŭaj ŝtonaj pordoj;

al Isengard’ enforta ard’ dum ŝtone nudas ĝiajfortoj,
ni iras, iras al milito, disfaligi ĝin kun spito;
ĉar brulas trunk’ kaj branĉoj brulas,forno muĝas — al milito!
Al land’ agaca marŝ’ minaca, ni tambure venas, venas;
al Isengard’ minace venas!
Minace kaj milite venas!

Tiel ili kantis marŝante suden.

Bregalado brilokule aliĝis apud Arbobarbo. La maljuna ento nun reprenis la hobitojn kaj surŝultrigis ilin, kaj tiel ili rajdis fiere antaŭ la kantanta trupo kun batantaj koroj kaj kapoj alte tenataj. Kvankam ili atendis, ke okazos io finfine, mirigis ilin la ŝanĝiĝo envolvinta la entojn. Tio ŝajnis nun tiel subita, kiel la elverŝiĝo de tajdo delonge barita de digo.

— La entoj finfine decidiĝis iom rapide, ĉu ne? — Grinĉjo riskis diri post kelka tempo, kiam la kantado momente ĉesis kaj aŭdiĝis nur la batado de manoj kaj piedoj.

— Ĉu rapide? — diris Arbobarbo. — Hum! Jes ja. Pli rapide ol mi atendis. Efektive mi ne vidis ilin tiel agititaj jam treege longe. Ni entoj ne ŝatas agitiĝi; kaj ni neniam agitiĝas, krom se estas al ni klare, ke niaj arboj kaj niaj vivoj troviĝas en granda danĝero. Tio ne okazis en la Arbarego depost la militoj inter Saŭrono kaj la Homoj de l’ Maro. Estas la orka agado, la malrespondeca hakado — *rárum* — sen eĉ la malinda senkulpigo de fajronutrado, kiu kolerigis nin; kaj la perfido far la najbaro, kiu devus helpi nin. Sorĉistoj devus kompreni pli bone: ili ja komprenas pli bone. Ekzistas neniu malbeno en la elfa, la enta, aŭ en la lingvoj de homoj sufiĉe severa por tia perfido. Bas Sarumano!

— Ĉu vi efektive rompos la pordegon de Isengardo? — demandis Gaja.

— Ho, hm, nu, ni ja povus, vidu! Vi eble ne scias, kiom ni estas fortaj. Eble vi aŭdis pri troloj? Ili estas potence fortaj. Sed troloj estas nur surogatoj, kreitaj de la Malamiko en la Granda Mallumo, moke je la entoj, kiel orkoj estas surogataj elfoj. Ni estas pli fortaj ol troloj. Ni estas kreitaj el la ostoj de la tero. Ni povas dissplitи ŝtonon samkiel arbradikoj, nur pli rapide, multe pli rapide, se niaj mensoj agitiĝis! Se ni ne estos dehakitaj aŭ fajre detruitaj aŭ sorĉitaj, ni povos disfendi Isengardon je splitoj kaj fende diserigi ĝiajn murojn.

— Sed Sarumano klopodos malhelpi vin, ĉu ne?

— Hm, ha, jes, tiel estas. Tion mi ne forgesis. Efektive mi longe pripensis tion. Sed, vidu, multaj entoj estas pli junaj ol mi, je multaj arbovivoj. Nun ili ĉiuj estas agititaj, kaj ilia menso direktiĝas al unusola afero: disrompo de Isengardo. Sed baldaŭ ili komencos pensi denove: ili trankviliĝos iom, kiam ni sorbos nian vesperan trinkaĵon. Kian soifon ni

havos! Sed lasu ilin nun marŝi kaj kanti! Longa vojo estas irota kaj antaŭ ni estas tempo por pensado. Valoras, ke ni ekiris.

Arbobarbo marŝis plu, kantante kelkan tempon kun la aliaj. Sed post iom da tempo lia voĉo murmuriĝis kaj denove silentiĝis. Grinĉjo povis vidi, ke lia maljuna frunto estas sulketita kaj nodoza. Finfine li rigardis supren, kaj Grinĉjo povis vidi en liaj okuloj esprimon malĝojan, malĝojan, sed ne malfeliĉan. En ili estis lumo, kvazaŭ la verda flamo sinkus pli profunden en la malhelajn putojn de lia pensado.

— Kompreneble, karaj amikoj, estas sufiĉe probable, — li malrapide diris, — ke ni iras al la propra finsorto: la lasta marŝado de la entoj. Sed se ni restus hejme kaj farus nenion, la finsorto ĉiuokaze trafus nin, pli aŭ malpli baldaŭ. Tiu penso delonge kreskis en niaj koroj; kaj tial ni marŝas nun. Tio ne estis hasta decido. Nun finfine la lasta marŝado de la entoj valoros kanton. Jes, — li suspiris, — ni eble helpos la ceterajn popolojn, antaŭ ol ni forpasos. Tamen mi ŝatus vidi realiĝon de la kantoj pri la entedzinoj. Mi kore ŝatus revidi Fimbretilan. Sed vidu, miaj amikoj, kantoj kiel arboj fruktas nur siatempe kaj siamaniere: kaj kelkfoje ili velkas maloportune.

La entoj paŝadis rapidpaŝe. Ili descendis en longan faldaĵon de la tero, kiu deklivis suden. Jam ili komencis supren grimpi, kaj supren, al la alta okcidenta firsto. La arboj maloftiĝis, kaj ili venis al disaj bosketoj da betuloj, kaj poste al nudaj deklivoj kie kreskis nur malmultaj magraj pinoj. La suno sinkis post la malhelan montodorson antaŭ ili. Grize krepuskiĝis.

Grinĉjo retrorigardis. La entoj estis plimultiĝintaj — aŭ kio okazis? Kie devus kuŝi la malklaraj nudaj deklivoj, kiujn ili trapasis, tie li pensis vidi boskojn da arboj. Sed tiuj moviĝis! Ĉu eblis, ke la arboj de Fangorno vekiĝis, kaj la arbaro leviĝas marŝante transmonten al la milito? Li viŝis siajn okulojn scivolante, ĉu dormo aŭ ombroj trompis lin; sed la grandaj grizaj formoj moviĝis senĉese antaŭen. Aŭdiĝis bruo kiel vento tra multaj branĉoj. La entoj jam proksimiĝis al la verto de la firsto, kaj kantado tute ĉesis. Noktiĝis, kaj sekvis silento: nenio aŭdeblis krom mallaŭta vibrado de la tero sub la piedoj de la entoj kaj susuro, ombro de flustro, kvazaŭ pro multaj drivantaj folioj. Fine ili ekstaris sur la supro kaj rigardis suben en malhelan puton: la grandan fendaĵon ĉe la montekstremo: Nan Kuruniro, la valo de Sarumano.

— Nokto envolvas Isengardon, — diris Arbobarbo.

5

La blanka rajdanto

Frostas eĉ miaj ostoj, — diris Gimlio, frapante per siaj brakoj kaj batante teron per siaj piedoj. La tago finfine venis. Je tagiĝo la kunuloj matenmanĝis tiel kiel eblis; nun en la kreskanta lumo ili pretiĝis esplori denove la terenon por postsignoj de la hobitoj.

— Kaj ne forgesu pri tiu maljunulo! — diris Gimlio. — Mi estus pli kontenta, se mi vidus spuron de boto.

— Kial tio kontentigus vin? — diris Legolaso.

— Ĉar maljunulo kies piedoj postlasis spurojn eble ne estus alia ol li ŝajnas esti, — respondis la gnomo.

— Eble, — diris la elfo, — sed peza boto eble ne lasus ĉi tie spurojn: la herbo estas profunda kaj resaltema.

— Tio ne perpleksus disirulon, — diris Gimlio. — Kurbiĝinta herbero sufiĉas, por ke Aragorno interpretu ĝin. Sed mi ne atendas, ke li trovos spurojn. Tio estis misa fantomo de Sarumano, kion ni hieraŭ nokte vidis. Mi certas, eĉ en la matena lumo. Eĉ nun liaj okuloj rigardas nin de Fangorno, eble.

— Estas tre verŝajne, — diris Aragorno, — tamen mi ne estas certa. Mi pensas pri la ĉevaloj. Vi diris hieraŭ nokte, Gimlio, ke ili estis fortimigitaj. Sed al mi ŝajnis, ke ne. Ĉu vi aŭdis ilin, Legolaso? Ĉu laŭ via opinio ili sonis kiel bestoj teruritaj?

— Ne, — diris Legolaso. — Mi klare aŭdis ilin. Se ne efikus la mallumo kaj nia propra timo, mi konjektus, ke temas pri bestoj ardaj pro ia subita ĝojo. Ili parolis laŭ maniero de ĉevaloj, renkontintaj amikon longe mankintan.

— Tion pensis mi, — diris Aragorno, — sed mi ne povos solvi la enigmon krom se ili revenos. Ek! La lumo rapide plifortiĝas. Unue mi rigardu kaj poste konjektu! Ni devas komenci ĉi tie, proksime al nia bivako, zorge serĉante la ĉirkaŭaĵon kaj progresante supren laŭ la deklivo al la arbaro. Trovi la hobitojn estas nia celo, kion ajn ni pensas pri nia nokta vizitinto. Se ili hazarde eskapis, ja ili nepre kaŝiĝis en la arboj aŭ ili estus vidataj. Se ni trovos nenion inter ĉi tie kaj la randoj de l' arbarego, poste ni plenumos lastan serĉon sur la batalkampo kaj inter la cindroj. Sed tie troviĝas malmulte da espero: la rajdistoj de Rohano faris sian laboron tro diligente.

Dum kelka tempo la kunuloj rampis kaj palpis sur la tero. La arbo staris morne super ili, ties sekaj folioj jam pendantaj malrigide, klakis pro la malvarmega orienta vento. Aragorno malrapide formoviĝis. Li venis al la cindroj de la gardofajro apud la riverbordo, kaj poste komencis spuri la teron retro al la teramaseto, kie okazis la batalo. Subite li kliniĝis kaj proksimigis sian vizaĝon preskaŭ en la herbon. Poste, li alvokis la aliajn. Ili alkuris.

— Jen finfine ni trovas informon! — diris Aragorno. Li levis rompitan folion por ke ili vidu ĝin, grandan palan folion orkoloran, jam velkantan kaj bruniĝantan. — Jen folio de malorno el Lorieno, kaj jen sur ĝi nutraĵeretoj kaj ankoraŭ kelkaj pliaj nutraĵeretoj en la herbo. Kaj vidu! Apude kuŝas kelkaj pecoj de tranĉita ŝnureto!

— Kaj jen la tranĉilo, kiu tranĉis ilin! — diris Gimlio. Li kliniĝis kaj eltiris el herbotufo, en kiun premis ĝin ies peza piedo, mallongan segecan klingon. La tenilo, de kiu ĝi estis forrompita, kuŝis apude. — Ĝi estas orka armilo, — li diris, singardeme tenante ĝin kaj rigardante kun abomeno ĝian ĉizitan tenilon: oni formis ĝin kiel hidan kapon kun strabaj okuloj kaj rikanaĉa buŝo.

— Nu, jen la plej stranga enigmo, kiun ni ĝis nun trovis! — ekkriis Legolaso. — Ligita kaptito eskapas de la orkoj kaj ankaŭ de la ĉirkaŭaj rajdistoj. Li tiam haltas, dum ankoraŭ senŝirma, kaj tranĉas siajn ligaĵojn per orka tranĉilo. Sed kiel kaj kial? Ĉar se la kruroj estis ligitaj, kiel li marŝis? Kaj se liaj brakoj estis ligitaj, kiel li uzis la tranĉilon? Kaj se neniu el ambaŭ estis ligita, kial entute tranĉi la ŝnuretojn? Kontenta pri sia lerto li poste sidiĝis kaj manĝis kviete iom da vojpano! Tio en si mem sufiĉas por indiki, ke li estis hobito, sen la malorna folio. Post ĉio ĉi, supozeble, li flugiligis siajn brakojn kaj forbirdis ĉirpante en la arbojn. Devus esti facile trovi lin: necesos nur havi proprajn flugilojn!

— Okazis sorĉado ĉi tie, efektive, — diris Gimlio. — Kion faris tiu maljunulo? Kion vi diras, Aragorno, pri la interpreto de Legolaso? Ĉu vi povas superi ĝin?

— Eble jes, — diris Aragorno ridetante. — Troviĝas kelkaj aliaj signoj en la proksimo, kiujn vi ne pripensis. Mi konsentas, ke la kaptito estis hobito kaj certe havis liberajn krurojn aŭ manojn antaŭ ol veni ĉi tien. Mi konjektas, ke temis pri la manoj, ĉar tiuokaze la enigmo plifaciliĝas, kaj ankaŭ ĉar laŭ mia interpreto de la signoj li estis *portita* ĉi tien de orko. Sango elverŝiĝis tie for kelkajn paŝojn, ja orka sango. Ĉirkaŭ tiu ĉi loko estas profundaj spuroj de hufoj kaj indikoj, ke io peza estis fortrenita. La orkon mortigis rajdantoj, kaj poste la kadavro estis trenita al la fajro. Sed la hobito estis nevidita: li ne estis senŝirma, ĉar estis nokte, kaj li ankoraŭ

havis sian elfan mantelon. Li estis elĉerpita kaj malsata, kaj ne estas mirinde, ke tranĉinte siajn ligaĵojn per la tranĉilo de sia falinta malamiko, li ripozis kaj manĝis iomete antaŭ ol forrampi. Sed estas konsole konstati, ke en la poŝo li havis iom da *lembaso*, eĉ se li forkuris sen havaĵo aŭ tornistro; tio, eble, estas tre hobitece. Mi diras *li*, kvankam mi esperas kaj konjektas, ke Gaja kaj Grinĉjo estis kune ĉi tie ambaŭ. Troviĝas tamen nenio, kio pruvas tion eksterdube.

— Kaj kiel laŭ via opinio okazis, ke unu aŭ alia el niaj amikoj hazarde havis liberan manon? — demandis Gimlio.

— Mi ne scias, kiel tio okazis, — respondis Aragorno. — Mi ankaŭ ne scias, kial orko forportis ilin. Certe ne por helpi ilian eskapon. Ne, prefere mi pensas, ke mi jam ekkomprenas ion, kio perpleksis min ekde la komenco. Kial, kiam Boromiro estis falinta, la orkoj kontentis pri kapto de Gaja kaj Grinĉjo? Ili ne serĉis la ceterajn, nek atakis nian bivakon; anstataŭe ili iris kiel eble plej rapide al Isengardo. Ĉu ili supozis, ke ili jam kaptis la Ringoportanton kaj ties fidelan kamaradon? Mi opinias, ke ne. Iliaj mastroj ne riskus doni tian klaran ordonon al orkoj, eĉ se ili scius tion mem; ili ne parolus malkaŝe al ili pri la Ringo: tiuj ne estas fidindaj servantoj. Sed mi opinias, ke al la orkoj estis ordonite kapti *hobitojn* vivantajn je ĉia kosto. Oni klopodis formalaperi kun la altvaloraj kaptitoj antaŭ la batalo. Eble okazis perfido, sufiĉe probabla ĉe tia popolo; iu granda kaj aŭdaca orko eble provis eskapi sola kun la rabaĵo propracele. Jen, tia estas mia rakonto. Aliajn oni povus elpensi. Sed pri tio ĉi ni rajtas kalkuli ĉiuokaze: almenaŭ unu el niaj amikoj eskapis. Nia tasko estas trovi kaj helpi lin antaŭ ol ni reiros al Rohano. Ni devas ne esti fortimigitaj de Fangorno, ĉar neceso pelis lin en tiun malhelan lokon.

— Mi ne scias, kiu fortimigas min pli: Fangorno aŭ penso pri longa vojo tra Rohano perpiede, — diris Gimlio.

— Do, ni iru en la arbaregon, — diris Aragorno.

Post nelonge Aragorno trovis aliajn signojn. Ĉe unu loko proksime al la bordo de Entvaŝo li alvenis spurojn de hobitoj, tro malpezaj por konstati per ili multon. Poste denove sub trunko de granda arbo ĉe la rando mem de l' arbaro estis trovitaj pliaj indikoj. La tero estis nuda kaj seka kaj ne vidigis multon.

— Almenaŭ unu hobito staris ĉi tie kelkan tempon kaj retrorigardis; kaj poste li sin forturnis en la arbaron, — diris Aragorno.

— Do ankaŭ ni devas eniri, — diris Gimlio. — Sed al mi ne plaĉas la aspekto de tiu ĉi Fangorno; kaj oni avertis nin kontraŭ ĝi. Mi preferus, ke la ĉaso konduku al iu ajn alia loko!

— Laŭ mi, la arbaro ne sentiĝas misa, kion ajn diras la rakontoj, — diris

Legolaso. Li staris rande de l' arbaro, Miniĝante antaŭen, kvazaŭ li aŭskultus, kaj rigardante larĝokule en la ombrojn. — Ne, ĝi ne estas malvirta; aŭ la malvirto en ĝi estas tre malproksima. Mi kaptas nur la plej mallaŭtajn eĥojn de malhelaj lokoj, kie la koroj de la arboj nigras. Ne troviĝas malico proksime al ni; sed troviĝas gardemo kaj kolero.

— Nu, ĝi ne havas motivon koleri pri mi, — diris Gimlio. — Mi neniel damaĝis ĝin.

— Tre feliĉe, — diris Legolaso. — Tamen ĝi suferis damaĝon. Io okazas interne, aŭ estas okazonta. Ĉu vi ne sentas la streĉitecon? Ĝi rabas al mi la spiron.

— La aero sentiĝas al mi sufokeca, — diris la gnomo. — La arbaro pli helas ol Mornarbaro, sed ĝi estas mucida kaj malneta.

— Ĝi estas maljuna, tre maljuna, — diris la elfo. — Tiel maljuna, ke mi preskaŭ sentas min denove juna, kion mi ne spertis de kiam mi ekvojaĝis kun vi, infanoj. Ĝi estas maljuna kaj memorplena. Mi povus esti feliĉa ĉi tie, se mi venus en tagoj pacaj.

— Mi volonte kredas tion, — snufis Gimlio. — Vi estas arbara elfo ĉiuokaze, kvankam ĉiaj elfoj estas stranguloj. Tamen vi konsolas min. Kien vi iros, tien iros ankaŭ mi. Sed tenu la pafarkon preta al la mano, kaj mi tenos mian hakilon malstrikta en la zono. Ne por uzo kontraŭ arboj, — li haste aldonis, rigardante supren al la arbo, sub kiu ili staris. — Mi ne volas renkonti tiun maljunulon senaverte sen preta argumento, jen ĉio. Ni iru!

Tion dirinte, la tri ĉasantoj plonĝis en la arbaron de Fangorno. Legolaso kaj Gimlio lasis la spuradon al Aragorno. Troviĝis malmulto videbla. La arbara subo estis seka kaj kovrita de folia drivaĵo; sed konjektante, ke la fuĝintoj preferus resti proksimaj al la akvo, li ofte reiris al la bordoj de la rivereto. Tial okazis, ke li venis al la loko, kie Gaja kaj Grinĉjo trinkis kaj banis siajn piedojn. Tie, klare videblaj al ĉiuj, estis la piedsignoj de du hobitoj, unuj iom pli malgrandaj ol la aliaj.

— Bona novaĵo, — diris Aragorno. — Tamen la spuroj jam aĝas du tagojn. Kaj ŝajnas, ke de ĉi tie la hobitoj forlasis la akvobordon.

— Do kion ni faru nun? — diris Gimlio. — Ni ne povas serĉi ilin tra la tuta fortikaĵo Fangorno. Ni venis malbone ekipitaj. Se ni ne trovos ilin baldaŭ, ni neniom utilos al ili krom por sidiĝi kun ili kaj pruvi nian amikecon per kuna malsatado.

— Se vere nur tion ni povas fari, tion ni do devas fari, — diris Aragorno. — Ni iru pluen.

Ili fine venis al la apika abrupta ekstremaĵo de l' Monto de Arbobarbo kaj suprenrigardis al la roka muro kun ties krudaj ŝtupoj kondukantaj ĝis la alta breto. Ekbriloj da sunlumo trapafis la rapidantajn nubojn, kaj la arbaro

jam ŝajnis malpli griza kaj morna.

— Ni supreniru kaj ĉirkaŭrigardu! — diris Legolaso. — Mi ankoraŭ spertas mankon de spiro. Mi ŝatus gustumi dum kelka tempo aeron pli liberan.

La kunuloj grimpis supren. Aragorno venis lasta, moviĝante malrapide: li rigardis tre atente la ŝtupojn.

— Mi preskaŭ certas, ke la hobitoj supreniris ĉi tie, — li diris. — Sed troviĝas aliaj signoj, signoj tre strangaj, kiujn mi ne komprenas. Mi scivolas, ĉu ni vidos ion de tiu ĉi breto, kio helpos nin diveni kiun vojon ili sekvis poste?

Li stariĝis kaj ĉirkaŭrigardis, sed li vidis nenion utilan. La breto frontis suden kaj orienten; sed nur oriente la videbleco apertis. Tie li vidis la arbosuprojn vice descendantajn al la ebenaĵo, kiun ili ĵus transiris.

— Ni vojaĝis laŭ pli longa vojo, — diris Legolaso. — Ni povus sendanĝere veni ĉi tien ĉiuj kune, se ni forlasus la Grandan Riveron je la dua aŭ tria tago kaj ekirus okcidenten. Malmultaj kapablas antaŭvidi, kien ilia vojo kondukos ilin, ĝis ili atingas ties finon.

— Sed ni ne volis veni al Fangorno, — diris Gimlio.

— Tamen ĉi tie ni estas — kaj bele enretigitaj, — diris Legolaso. — Vidu!

— Vidu kion? — diris Gimlio.

— Tie inter la arboj.

— Kie? Elfajn okulojn mi ne havas.

— Ĉit! Parolu malpli laŭte! Rigardu! — diris Legolaso fingromontrante. — Sube en la arbaro, retro laŭ la vojo, kiun ni ĵus trapasis. Estas li. Ĉu vi ne povas vidi lin irantan de arbo al arbo?

— Mi vidas, jam mi vidas! — siblis Gimlio. — Rigardu, Aragorno! Ĉu mi ne avertis vin? Jen la maljunulo. Vestita tute per malpuraj grizaj ĉifonoj: pro tio mi ne vidis lin komence.

Aragorno rigardis, kaj vidis kurban figuron, kiu moviĝis malrapide. Ĝi ne tre malproksimis. Ĝi aspektis kiel maljuna almozulo marŝanta lace, apoganta sin per kruda marŝbastono. Lia kapo estis klinita, kaj li ne rigardis al ili. Alilande ili salutus lin per afablaj vortoj, sed nun ili staris silentaj, ĉiu sentis strangan anticipon: alvenas io, kio posedas kaŝitan potencon — aŭ minacon.

Gimlio rigardis larĝokule dum iom da tempo, dum paŝon post paŝo la figuro proksimiĝis. Tiam subite, ne plu povante bridi sin, li ekkriis:

— Vian pafarkon, Legolaso! Strecu ĝin! Pretiĝu! Estas Sarumano. Ne lasu lin paroli, aŭ trafi nin per sorĉaĵo! Pafu anticipe!

Legolaso prenis sian pafarkon kaj strecis ĝin, malrapide kaj kvazaŭ

rezistus alies volo. Li tenis sagon en la mano loze, sed ne metis ĝin al la kordo. Aragorno staris silenta, kun la vizaĝo atentema kaj koncentriĝa.

— Kial vi atendas? Kio estas al vi? — diris Gimlio per sibla flustro.

— Legolaso pravas, — diris Aragorno kviete. — Ni ne rajtas pafi maljunulon tiamaniere, nekonscian kaj ne alparolitan, kia ajn timo aŭ dubo envolvas nin. Rigardu kaj atendu!

Tiumomente la maljunulo rapidigis siajn paŝojn kaj venis laŭ surpriza rapideco ĝis la subo de la roka muro. Tie li subite rigardis supren, dum ili staris senmove rigardante suben. Aŭdiĝis neniu sono.

Lian vizaĝon ili ne povis vidi: li estis kapuĉita, kaj super la kapuĉo li portis larĝrandan ĉapelon, tiel, ke ĉiuj liaj trajtoj estis ombritaj, krom la pinto de lia nazo kaj lia griza barbo. Tamen al Aragorno ŝajnis, ke li ekvidas brileton de okuloj akraj kaj helaj el la ombro de la kapuĉita frunto.

Fine la maljunulo rompis la silenton:

— Ja feliĉe renkontite, miaj amikoj, — li diris mallaŭte. — Mi volas alparoli vin. Ĉu vi descendu aŭ mi algrimpu? — Ne atendante respondon li komencis grimpi.

— Nun! — kriis Gimlio. — Haltigu lin, Legolaso!

— Ĉu mi ne diris, ke mi volas alparoli vin? — diris la maljunulo. — Formetu tiun pafarkon, mastro elfo!

La pafarko kaj sago falis el la manoj de Legolaso, kaj liaj brakoj ekpendis loze ĉe liaj flankoj.

— Kaj vi, mastro gnomo, bonvolu forpreni la manon de via hakiltenilo ĝis mi venos supren! Tiujn argumentojn vi ne bezonos.

Gimlio abrupte tikis kaj poste staris senmova kiel ŝtono dum la maljunulo suprensaltis laŭ la ŝtuparo tiel lerte kiel kapro. La tuta laceco ŝajnis forlasinta lin. Kiam li surpaŝis la ŝtupon, okazis ekbrilo, tro mallonga por esti certa, subita ekapero de blanko, kvazaŭ estus momente vidigita vestaĵo kaŝita sub la grizaj ĉifonoj. La enspiro de Gimlio aŭdiĝis kiel laŭta siblo en la silento.

— Bone renkontite, mi diras denove! — diris la maljunulo, proksimiĝante al ili. Kiam li foris kelkajn paŝojn, li stariĝis klinite al sia marŝbastono, kun la kapo puŝita antaŭen, rigardante ilin el sub la kapuĉo. — Kaj kion vi faras en tiu ĉi loko? Elfo, homo kaj gnomo, ĉiu vestita elfmaniere. Sendube malantaŭ tio estas aŭskultinda rakonto. Tiajn aferojn oni malofte vidas ĉi tie.

— Vi parolas, kiel iu, kiu bone konas Fangornon, — diris Aragorno. — Ĉu ne vere?

— Ne tre bone, — diris la maljunulo: — tio estas studaĵo multviva. Sed mi venas ĉi tien de tempo al tempo.

— Ĉu mi rajtas scii vian nomon kaj poste aŭdi tion, kion vi volas diri al ni? — diris Aragorno. — La mateno pasas, kaj ni havas komision, kiu ne prokrastiĝu.

— Koncerne tion, kion mi volis diri, mi jam diris ĝin: Kion vi faras kaj kiun historion vi povas rakonti pri vi? Koncerne mian nomon! — Li abrupte malparolis, ridante longe kaj mallaŭte. Pro la sono Aragorno sentis tratremon, strangan fridan ekvibron; kaj tamen nek timon, nek teruron li spertis: prefere ĝi similis subitan gluton de akra aero, aŭ la vangofrapon de malvarma pluvo, kiu vekas maltrankvilan dormanton.

— Mian nomon! — rediris la maljunulo. — Ĉu vi ne jam divenis ĝin? Vi aŭdis ĝin antaŭe, ŝajnas al mi. Jes, vi aŭdis ĝin antaŭe. Sed ek do, kio pri via rakonto?

La tri kunuloj staris silentaj kaj tute ne respondis.

— Ekzistas kelkaj, kiuj ekdubis ĉu via komisio taŭgas por la rakonto, — diris la maljunulo. — Feliĉe mi scias iom pri ĝi. Vi spuras la piedsignojn de du junaj hobitoj, mi kredas. Jes, hobitoj. Ne gapu, kvazaŭ vi ne aŭdus antaŭe tiun strangan nomon. Vi aŭdis kaj ankaŭ mi aŭdis. Nu, ili grimpis ĉi tien antaŭhieraŭ; kaj ili renkontis iun, kiun ili ne atendis. Ĉu tio konsolas vin? Kaj nun vi ŝatus scii, kien oni kondukis ilin? Nu, nu, eble mi povas havigi al vi informon tiurilate. Sed kial ni staradas? Via komisio, vi komprenas, jam ne tiom urĝas, kiom vi supozis. Ni sidiĝu kaj estu malpli streĉitaj.

La maljunulo forturnis sin kaj aliris amaseton da falintaj ŝtonoj kaj rokoj sube de la malantaŭa klifo. Tuj, kvazaŭ sorĉo estus nuligita, la aliaj malstreĉiĝis kaj ekmoviĝis. La mano de Gimlio iris al la hakiltenilo. Aragorno elingigis sian glavon. Legolaso prenis sian pafarkon.

La maljunulo tute ne atentis, sed kliniĝis kaj sidigis sin sur malalta ebena ŝtono. Tiam lia griza mantelo disiĝis kaj ili vidis preterdube, ke li estas sube vestita tute blanke.

— Sarumano! — kriis Gimlio saltante al li hakil-en-mane. — Parolu! Diru al ni, kie vi kaŝis niajn amikojn! Kion vi faris pri ili? Parolu, aŭ mi fendos vian ĉapelon tiel, ke eĉ sorĉisto malfacile scios trakti tion!

La maljunulo estis tro agopreta. Li salte stariĝis kaj alsaltis la supron de granda roko. Tie li staris, subite altiĝinte, baŭmante super ili. Liaj kapuĉo kaj grizaj ĉifonoj estis forĵetitaj. Liaj blankaj vestaĵoj brilis. Li levis sian bastonon kaj la hakilo de Gimlio saltis el lia mano kaj falis sonore al la tero. La glavo de Aragorno, rigida en lia senmova mano, ekflamis per subita fajro. Legolaso elpuŝis laŭtan krion kaj pafis sagon alten en la aeron: ĝi malaperis en flama flagro.

— Mitrandiro! — li kriis. — Mitrandiro!

— Bone renkontite, mi rediras al vi, Legolaso! — diris la maljunulo.

Ili ĉiuj gapis al li. Liaj haroj estis blankaj kiel la neĝo en la sunlumo; kaj brile blanka estis lia robo; la okuloj sub liaj profundaj brovoj estis brilaj, pikantaj kiel la sunradioj; lia mano estis potencoplena. Mirigite, ĝoje kaj timplene ili staris kaj trovis neniujn direblajn vortojn.

Fine Aragorno ekmoviĝis.

— Gandalfo! — li diris. — Super nia espero vi revenas al ni en nia bezono! Kio vualis mian vidpovon? Gandalfo!

Gimlio diris nenion, sed lante genuiĝis, ombrumante siajn okulojn.

— Gandalfo, — la maljunulo rediris, kvazaŭ revokante el malnova memoro vorton longe neuzitan. — Jes, tio estis la nomo. Mi estis Gandalfo.

Li paŝis de sur la roko kaj, preninte sian grizan mantelon, volvis sin per ĝi: ŝajnis kvazaŭ la suno brilus, sed nun denove estis kaŝita en nubo.

— Jes, vi rajtas ankoraŭ nomi min Gandalfo, — li diris, kaj la voĉo estis la voĉo de ilia malnova amiko kaj gvidinto. — Stariĝu, mia bona Gimlio! Ne kulpas vi, kaj nenio malbona okazis al mi. Efektive, miaj amikoj, neniu el vi havas armilon, kiu kapablus damaĝi min. Estu gajaj! Ni renkontiĝis denove. Ĉe alterniĝo de la tajdo. Venas la granda ŝtormo, sed la tajdo alterniĝis.

Li metis sian manon sur la kapon de Gimlio, kaj la gnomo rigardis supren kaj subite ekridis:

— Gandalfo! — li diris. — Sed vi estas tute blankvestita!

— Jes, nun mi estas blanka, — diris Gandalfo. — Efektive mi *estas* Sarumano, oni preskaŭ povus diri, Sarumano tia, kia li devintus esti. Sed ek jam, sciigu min pri vi! Mi trapasis fajron kaj profundan akvon de kiam ni disiĝis. Mi forgesis multon, kion mi supozis scii, kaj lernis multon, kion mi forgesis. Mi povas vidi multajn aferojn en la foro, sed multajn aferojn proksimajn mi ne povas vidi. Rakontu al mi pri vi!

— Kion vi deziras scii? — demandis Aragorno. — Ĉio okazinta post nia disiĝo sur la ponto estus rakonto longa. Ĉu vi ne volas unue sciigi nin pri la hobitoj? Ĉu vi trovis ilin, kaj ĉu ili estas sekuraj?

— Ne, mi ne trovis ilin, — diris Gandalfo. — Super la valoj de Emin Muilo estis mallumo, kaj mi ne sciis pri ilia kaptiteco ĝis informis min la aglo.

— La aglo! — diris Legolaso. — Mi vidis aglon alte kaj fore: la lasta fojo estis antaŭ tri tagoj super Emin Muilo.

— Jes, — diris Gandalfo, — tiu estis Gvajhiro la Ventmastro, kiu savis min el Ortanko. Mi sendis lin antaŭen por gvati la riveron kaj kolekti informojn. Li vidas akre, sed li ne povas vidi ĉion okazantan sub montoj kaj arboj. Iujn aferojn li ja vidis kaj iujn aliajn mi mem vidis. La Ringo jam

pasis ekster mian helpivon aŭ la helpivon de iu ajn el la Kunularo, kiu ekvojaĝis el Rivendelo. Ĝi preskaŭ riveliĝis al la Malamiko, sed ĝi eskapis. Mi iom partoprenis tion: ĉar mi sidis en alta loko, kaj mi luktis kontraŭ la Malhelan Turegon, kaj la Ombro forpasis. Tiam mi estis lacega, vere lacega; kaj mi longe promenis malhele pensante.

— Sekve vi scias pri Frodo! — diris Gimlio. — Kiel iras liaj aferoj?

— Mi ne scias. Li estis savita el granda danĝero, sed multaj aliaj ankoraŭ troviĝas antaŭ li. Li decidis iri sola al Mordoro kaj li ekvojaĝis: jen ĉio, kion mi scias.

— Ne sola, — diris Legolaso. — Ni opinias, ke Sam akompanis lin.

— ĉu vere? — diris Gandalfo, kaj aperis ekbrilo en liaj okuloj kaj rideto sur lia vizaĝo. — Ĉu efektive? Tio estas novaĵo al mi, tamen ĝi ne surprizas min. Bone! Tre bone! Vi malpezigis mian koron. Vi devas rakonti al mi pli. Nun sidiĝu apud mi kaj rakontu al mi la historion de via vojaĝo.

La kunuloj sidiĝis surtere apud liaj piedoj kaj Aragorno komencis la rakonton. Dum longa tempo Gandalfo diris nenion, kaj li starigis neniujn demandojn. Liaj manoj estis disfingre metitaj sur liaj genuoj, kaj liaj okuloj estis fermitaj. Fine, kiam Aragorno parolis pri la morto de Boromiro kaj pri ties lasta vojaĝo sur la rivero, la maljunulo suspiris.

— Vi ne rakontis ĉion, kion vi scias aŭ divenas, amiko mia Aragorno, — li diris kviete. — Kompatinda Boromiro! Mi ne povis vidi, kio okazis al li. Ĝi estis malfacila peno por tia viro: batalanto kaj mastro de homoj. Galadriela informis min, ke li estis en danĝero. Sed li eskapis en la fino. Mi ĝojas. Ne vane la junaj hobitoj akompanis nin, se nur pro la destino de Boromiro. Sed tio ne estas ilia sola rolo. Ili estis gviditaj al Fangorno kaj ilia alveno similis tian faladon de ŝtonetoj, kia kaŭzas lavangon en montaro. Eĉ dum ni interparolas ĉi tie, mi aŭdas ties fruan murmuradon. Plej bone Saramano ne estu for de la hejmo kiam rompiĝos la digo!

— Unu via trajto ne ŝanĝiĝis, kara amiko, — diris Aragorno: — vi daŭre parolas enigme.

— Kio? Ĉu enigme? — diris Gandalfo. — Ne! ĉar mi laŭtparolis al mi mem. Kutimo de maljunuloj: ili elektas la plej saĝan ĉeestanton por alparolo; la longaj klarigoj necesaj al la junuloj estas lacigaj. — Li ridis, sed la sono jam ŝajnis varma kaj bonkora kiel ekbrilo da sunlumo.

— Mi ne plu estas juna, eĉ laŭ kalkulo de la homoj el la antikvaj domoj, — diris Aragorno. — Ĉu vi ne volas pli klare malfermi vian penson al mi?

— Kion do mi diru? — diris Gandalfo kaj iomete paŭzis pensante. — Jen mallonge kiel mi nun vidas la aferojn, se vi volas ricevi pecon kiel eble plej klaran de mia menso. La Malamiko kompreneble jam delonge scias, ke la Ringo ien vagas kaj ke ĝin portas hobito. Li scias la nombron de

nia Kunularo kiu ekvojaĝis el Rivendelo, kaj kiaj ni estas unuope. Sed li ankoraŭ ne perceptas klare nian celon. Li supozas, ke ni ĉiuj volis iri al Minaso Tirit; ĉar tion farus li mem sur nia loko. Kaj laŭ lia saĝo tio estus grava bato al lia potenco. Efektive, li forte timas, ne sciante kia potenculo povas subite aperi, utiligante la Ringon kaj atakante lin milite, celante subenĵeti kaj anstataŭi lin. Ke ni volus suben ĵeti lin kaj havi *neniun* sur lia loko, estas penso, kiu ne venas en lian kapon. Ke ni volus detrui la Ringon mem, ankoraŭ ne penetris lian plej malluman sonĝon. En tio sendube vi konstatos nian bonan fortunon kaj nian esperon. Ĉar imaginte militon, li ekirigis militon, kredante, ke li devas ne malŝpari la tempon; ĉar tiu kiu batas la unua, se li batas sufiĉe forte, eble ne devos bati plu. Do la fortojn, kiujn li longe preparis, li nun funkciigas, pli frue ol li intencis. Saĝa stultulo. Ĉar se li uzus sian tutan potencon por gardi Mordoron, tiel ke neniu povu eniri, kaj direktus sian tutan ruzon al ĉasado de la Ringo, tiam efektive espero forvelkus: nek la Ringo nek ties portanto povus longe eviti lin. Sed nun liaj okuloj rigardas malproksimen anstataŭ hejmproksimen; kaj plejparte li rigardas al Minaso Tirit. Jam tre baldaŭ lia forto atakos ĝin kvazaŭ ŝtormo.

» Ĉar li jam scias, ke la komisiitoj, kiujn li sendis embuski la Kunularon, denove malsukcesis. La Ringon ili ne trovis. Ili ankaŭ ne forportis ostaĝe iujn hobitojn. Se ili eĉ farus tiom malmulte, tio estus al ni peza bato, kaj eble mortiga. Sed ni ne mornigu niajn korojn, imagante testadon de ilia milda lojaleco en la malluma Turego. Ĉar la Malamiko malsukcesis — ĝis nun. Dank' al Sarumano.

— Ĉu Sarumano ne estas perfidulo? — demandis Gimlio.

— Li ja estas, — diris Gandalfo. — Duoble. Kaj ĉu tio ne estas stranga? Nenio suferita de ni lastatempe ŝajnis tiel grava kiel la perfido far Isengardo. Taksata eĉ kiel estro kaj komandanto, Sarumano iĝis ege forta. Li minacas la homojn el Rohano kaj fortirigas ilian helpon el Minaso Tirit, ĝuste kiam la ĉefa bato proksimiĝas el la oriento. Tamen nefidinda armilo ĉiam endanĝerigas la manon. Ankaŭ Sarumano emas akiri mem la Ringon por si, aŭ almenaŭ kapti iujn hobitojn por siaj malvirtaj celoj. Do inter ili, niaj malamikoj nur sukcesis venigi Gajan kaj Grinĉjon mirinde rapide al Fangorno, kien ili alie neniam venus!

» Cetere, ili plenigis sin per novaj duboj, kiuj perturbas iliajn planojn. Neniu informo pri la batalo atingos Mordoron, dank' al la rajdistoj el Rohano; sed la malhela Mastro scias, ke du hobitoj estis kaptitaj en Emin Muilo kaj forportitaj al Isengardo kontraŭ la volo de liaj propraj servistoj. Li jam devas timi tiel Isengardon kiel Minason Tirit. Se falos Minaso Tirit, estos malbone al Sarumano.

— Estas domaĝe, ke niaj amikoj troviĝas inter la du, — diris Gimlio. — Se neniu tereno disigus Isengardon kaj Mordoron, ili ja povus interbatali, dum ni spektus kaj atendus.

— La venkinto travivus pli forta ol ambaŭ kaj libera je duboj, — diris Gandalfo. — Sed Isengardo ne povas batali kontraŭ Mordoro, krom se Sarumano pli frue akirus la Ringon. Tion li jam neniam faros. Li ankoraŭ ne scias pri sia danĝero. Ja multon li ne scias. Tiel avide li volis kapti sian predon, ke li ne povis resti hejme, kaj li elvenis por renkonti kaj spioni siajn komisiitojn. Sed li venis tro malfrue, iom escepte, kaj la batalo finiĝis kaj estis ekster lia helpivo antaŭ ol li atingis ĉi tiun terenon. Li ne longe restis ĉi tie. Mi enrigardis lian menson kaj vidis lian dubemon. Mankas al li natura klereco. Li opinias, ke la rohananoj mortigis kaj bruligis ĉiujn sur la batalkampo; sed li ne scias, ĉu aŭ ne la orkoj alportis iujn kaptitojn. Kaj li ne scias pri la kverelo inter liaj servistoj kaj la orkoj de Mordoro, kiel li ankaŭ ne scias pri la Flugilhava Kuriero.

— Ĉu la Flugilhava Kuriero! — kriis Legolaso. — Tiun mi pafis per la pafarko de Galadriela super Sarn Gebiro, kaj mi faligis lin el la ĉielo. Li timplenigis nin. Kia nova teruraĵo estas tio ĉi?

— Tia, kian vi ne povas mortigi per sagoj, — diris Gandalfo. — Vi mortigis nur lian rajdbeston. Tio estis taŭga faro, sed la Rajdanto baldaŭ denove surseliĝis. Ĉar li estas nazgulo, unu el la naŭ, kiuj rajdas nun ĉevalojn flugilhavajn. Baldaŭ ilia teruro superombros la lastajn armeojn de niaj amikoj, forbarante la sunon. Sed al ili ankoraŭ ne estas permesate transiri la Riveron, kaj Sarumano ne konas tiun novan formon, en kiu la ringofantomoj estas vestitaj. Li pensadas ĉiam pri la Ringo. Ĉu ĝi ĉeestis dum la batalo? ĉu ĝi estis trovita? Kiel se Teodeno, Mastro de Markio, trovus ĝin kaj ekscius pri ĝia potenco? Tio estas la danĝero, kiun li perceptas, kaj li refuĝis al Isengardo por duobligi kaj triobligi sian atakon kontraŭ Rohano. Kaj la tutan tempon ekzistas alia danĝero, tre proksima, kiun li ne perceptas okupate de siaj ardaj pensoj. Li forgesis pri Arbobarbo.

— Nun vi denove alparolas vin mem, — diris Aragorno ridetante. — Arbobarbo ne estas konata al mi. Kaj mi divenis parton de la duobla perfido de Saramano; tamen mi ne vidas, kiel servas la alveno de la du hobitoj al Fangorno, krom kaŭzi al ni longan kaj senfruktan ĉasadon.

— Atendu momenton! — kriis Gimlio. — Alian aferon mi ŝatus scii unue. Ĉu tiu estis vi, Gandalfo, aŭ Sarumano, kiun ni vidis hieraŭ nokte?

— Tutcerte min vi ne vidis, — respondis Gandalfo, — sekve mi devas konjekti, ke vi vidis Sarumanon. Konstateble ni tiom similas unu la alian, ke oni devas pardoni vian deziron nekuraceble fendi mian ĉapelon.

— Bone, bone! — diris Gimlio. — Mi ĝojas, ke temis ne pri vi.

Gandalfo ridis denove:

— Jes, mia bona gnomo, — li diris, — estas agrable ne erari ĉiupunkte. Tion mi ja scias mem tre bone! Sed kompreneble mi neniam kulpigis vin pro via bonvenigo de mi. Kiel povus fari tion mi, kiu tiel ofte konsilis al miaj amikoj, ke ili suspektu eĉ la proprajn manojn intertraktante kun la Malamiko. Benon al vi, Gimlio, filo de Gloino! Eble iutage vi vidos nin ambaŭ kune kaj juĝos inter ni!

— Sed la hobitoj! — Legolaso intermetis. — Ni longe vojaĝis serĉante ilin kaj ŝajnas, ke vi scias, kie ili estas. Kie ili nun estas?

— Kun Arbobarbo kaj la entoj, — diris Gandalfo.

— La entoj! — ekkriis Aragorno. — Do troviĝas vero en la malnovaj legendoj pri la loĝantoj en la arbarprofundoj kaj la gigantaj paŝtistoj de l' arboj, ĉu? Ĉu ankoraŭ troviĝas entoj en la mondo? Mi supozis ilin nur memoraĵo el la tagoj praaj, se entute ili iam estis pli ol legendo el Rohano.

— Legendo el Rohano! — kriis Legolaso. — Ne, ĉiu elfo en Sovaĝujo kantis kantojn pri la maljunaj onodroj kaj ties longa malĝojo. Tamen eĉ inter ni ili estas nur memoraĵo. Se mi renkontus tian ankoraŭ promenantan en tiu ĉi mondo, tiam mi efektive denove sentus min juna! Sed Arbobarbo: tio estas nur traduko de Fangorno en la Komunan Lingvon; tamen vi parolas pri persono. Kiu estas tiu ĉi Arbobarbo?

— Ha, nun vi postulas multon, — diris Gandalfo. — Tiu malmulto, kiun mi scias pri lia longa lanta historio, fariĝus rakonto, por kiu ni ne disponas tempon. Arbobarbo estas Fangorno, la gardisto de l' arbarego. Li estas la plej maljuna el la entoj, la plej maljuna vivanto, kiu ankoraŭ promenas sub la suno sur tiu ĉi Mez-Tero. Mi vere esperas, Legolaso, ke vi eble iam renkontos lin. Gaja kaj Grinĉjo estis bonŝancaj: ili renkontis lin ĉi tie, ĝuste kie ni sidas. Li venis ĉi tien antaŭ du tagoj kaj forportis ilin al sia loĝejo en la foro ĉe la radikaro de la montoj. Li ofte venas ĉi tien, precipe kiam lia menso estas maltrankvila kaj ĝenas lin onidiroj el la ekstera mondo. Mi vidis lin antaŭ kvar tagoj paŝeganta inter la arboj, kaj mi opinias, ke li vidis min, ĉar li paŭzis; sed mi ne parolis, ĉar mi estis peza pro la pensoj kaj laca post mia lukto kontraŭ la Okulo de Mordoro; kaj ankaŭ li ne parolis, nek vokis mian nomon.

— Eble ankaŭ li supozis vin Sarumano, — diris Gimlio. — Sed vi parolas pri li kvazaŭ pri amiko. Mi supozis, ke Fangorno estas danĝera.

— Ĉu danĝera! — kriis Gandalfo. — Kaj ankaŭ mi, tre danĝera: pli danĝera ol iu ajn renkontota de vi, krom se vi estos vive trenata antaŭ la seĝon de la Malluma Mastro. Kaj Aragorno estas danĝera, kaj Legolaso estas danĝera. Vi estas ĉirkaŭita de danĝeroj, Gimlio filo de Gloino; ĉar vi mem estas danĝera viamaniere. Certe la arbarego Fangorno estas

danĝeroplena — ne malpleje por tiuj, kiuj tro agopretas hakile; kaj Fangorno mem, ankaŭ li estas danĝeroplena; tamen malgraŭ tio li estas saĝa kaj bonfarema. Sed nun lia longa lanta kolero ekelverŝiĝas kaj plenigas la tutan arbaregon. La alveno de l' hobitoj kaj la informoj, kiujn ili alportis, igis ĝin elverŝiĝi: baldaŭ ĝi fluos inunde; sed ĝia tajdo estas direktita kontraŭ Sarumanon kaj la hakilojn de Isengardo. Io estas okazonta, kiu ne okazis depost la Praaj Tagoj: la entoj vekiĝos kaj trovos, ke ili estas fortaj.

— Kion ili faros? — demandis Legolaso mirigite.

— Mi ne scias, — diris Gandalfo. — Mi opinias, ke ili mem ne scias. Mi scivolas. — Li silentiĝis, kun la kapo penseme klinita.

La aliaj rigardis lin. Ekbrilo de sunlumo tra nuboj pasantaj trafis liajn manojn, kiuj nun kuŝis polmosupre sur lia sino: ili ŝajnis plenigitaj de lumo kiel tason plenigas akvo. Finfine li suprenrigardis rekte al la suno.

— La mateno foruziĝas, — li diris. — Baldaŭ ni devos ekiri.

— Ĉu ni iros trovi niajn amikojn kaj vidi Arbobarbon? — demandis Aragorno.

— Ne, — diris Gandalfo. — Ne tiun vojon vi devos iri. Mi parolis vortojn esperoplenajn. Sed nur esperoplenajn. Espero ne estas venko. Milito atencas nin kaj ĉiujn niajn amikojn, milito, en kiu nur uzado de la Ringo kapablus certigi nin pri venko. Tio plenigas min de granda malĝojo kaj granda timo: ĉar multo estas detruota kaj ĉio eble perdiĝos. Mi estas Gandalfo, Gandalfo la Blanka, sed Nigra eĉ pli potencas.

Li stariĝis kaj forrigardis orienten, mane ombrumante la okulojn, kvazaŭ li vidus aferojn malproksimajn, kiujn neniu el ili povis vidi. Poste li skuis sian kapon.

— Ne, — li diris mallaŭte, — tio progresis trans nian atingopovon. Almenaŭ pri tio ni ĝoju. Ne plu eblas tentiĝi al uzado de l' Ringo. Ni devas malsupreniri fronte al danĝero preskaŭ malesperiga, sed tiu lasta mortminaco estas forigita. — Li turniĝis. — Atentu, Aragorno, filo de Aratorno! Ne bedaŭru vian elekton en la valo de Emin Muilo, nek nomu tion vana persekutado. Vi elektis inter duboj la vojon, kiu ŝajnis ĝusta: la elekto estis prava kaj ĝi estas pravigita. Ĉar tiel ni renkontiĝis ĝustatempe, kaj alie eble ni renkontiĝus tro malfrue. Sed la serĉado por viaj kunuloj finiĝis. Via venonta vojaĝo estas signita per via donita promeso. Vi devos iri al Edoraso kaj aliri Teodenon en ties halo. Ĉar vi estas bezonata. La lumon de Andurilo oni jam devas malkovri en la batalo jam delonge atendita. Ekzistas milito en Rohano, kaj pli grava misaĵo: Teodeno statas malbone.

— Do mi ne plu revidos la gajajn junajn hobitojn, ĉu? — diris Legolaso.

— Tion mi ne diris, — diris Gandalfo. — Kiu scias? Paciencu. Iru kien

vi devas iri, kaj esperu! Al Edoraso! Ankaŭ mi iras tien.

— Longa marŝo estas tio por viro, ĉu juna ĉu maljuna, — diris Aragorno. — Mi timas, ke la batalo finiĝos longe antaŭ ol mi venos tien.

— Ni vidos, ni vidos, — diris Gandalfo. — Ĉu vi venos nun kun mi?

— Jes, ni ekiros kune, — diris Aragorno. — Sed mi ne dubas, ke vi venos tien antaŭ mi, se vi volos. — Li stariĝis kaj longe rigardis Gandalfon. La aliaj silente rigardis ilin starantajn tie fronte unu al la alia. La griza figuro de la viro, Aragorno filo de Aratorno, estis alta kaj ŝtone severa, kun la mano sur la tenilo de la glavo; li aspektis kvazaŭ reĝo el la maraj nebuloj surpaŝus la bordojn de homoj malpli grandiozaj. Antaŭ li ĝibiĝis la maljunula figuro, blanka, nun brilanta pro ia lumo ĉendita interne, kurba, ŝarĝita de jaroj, sed posedanta potencon pli grandan ol la potenco de reĝoj.

— Ĉu mi ne prave diris, Gandalfo, — diris Aragorno finfine, — ke vi povus iri kien ajn vi volus pli rapide ol mi? Kaj ankaŭ tion ĉi mi diras: vi estas nia estro kaj nia standardo. La Malluma Mastro havas Naŭ. Sed ni havas Unu, pli potencan ol ili: la Blankan Rajdanton. Li trapasis la fajron kaj la abismon, kaj lin ili timos. Ni iros tien, kien li gvidos.

— Jes, kune ni sekvos vin, — diris Legolaso. — Sed unue, malŝarĝus mian koron, Gandalfo, aŭdi, kio okazis al vi en Morio. Ĉu vi ne volas rakonti al ni? ĉu vi ne povas paŭzi eĉ por sciigi al viaj amikoj, kiel vi saviĝis?

— Mi jam paŭzis tro longe, — respondis Gandalfo. — Tempo urĝas. Sed se jaro estus disponebla, mi ne rakontus al vi la tuton.

— Do rakontu al ni, kion vi volas kaj la tempo permesas! — diris Gimlio. — Ek, Gandalfo, sciigu al ni, kion vi spertis kun la balrogo.

— Tiun ne nomu! — diris Gandalfo, kaj momente ŝajnis, ke dolornubo trapasis lian vizaĝon, kaj li sidis silenta, aspektante morte maljuna. — Longe mi falis, — li diris finfine, malrapide, kvazaŭ nur malfacile repensante. — Mi falis longe, kaj li falis kun mi. Lia fajro ĉirkaŭis min. Mi estis brulvundita. Tiam ni plonĝis en profundan akvon kaj ĉio estis senluma. Frida tio estis kiel la tajdo de morto: ĝi preskaŭ glaciigis mian koron.

— Profunda estas la abismo, kiun traarkas la Durina Ponto, kaj neniu iam sondis ĝin, — diris Gimlio.

— Tamen ĝi havas fundon, preter lumo kaj scio, — diris Gandalfo. — Tien mi finfine venis ĝis la plej fora ŝtona fundamento. Li daŭre akompanis min. Lia fajro estis estingita, sed jam li estis io ŝlima, pli forta ol strangola serpento. Ni luktis fore sub la viva tero, kie la tempon oni ne kalkulas. Ĉiam denove li ekkaptis min kaj ĉiam denove mi hakis lin, ĝis fine li fuĝis en la senlumajn tunelojn. Ilin ne konstruis la popolo de Durino, Gimlio filo de Gloino. Forege sub la plej profunda fosado de la gnomoj la

mondon maĉas aĵoj sennomaj. Eĉ Saŭrono ne konas ilin. Ili estas pli aĝaj ol li. Nun mi promenis tie, sed mi alportos neniun raporton, kiu malheligu la tagan lumon. En tiu malespero mia sola espero estis mia malamiko, kaj mi persekutis lin kaptinte lian kalkanon. Tiel li gvidis min finfine ĝis la sekretaj vojoj de Ĥazad-Dumo: tro bone li konis ilin ĉiujn. Ĉiam supren ni jam iris, ĝis ni venis la Senfinan ŝtuparon.

— Longe tiu estis perdita, — diris Gimlio. — Multaj diradis, ke neniam ĝi estis konstruita krom legende, sed aliaj diris, ke ĝi estis detruita.

— Ĝi estis konstruita, kaj ĝi ne estas detruita, — diris Gandalfo. — Ekde la plej funda kelego ĝis la plej alta pinto ĝi supreniris, ascendante laŭ seninterrompa spiralo de multmilaj ŝtupoj, ĝis ĝi eliris fine en la Durina Turo ĉizita el la viva roko de Zirak-Zigilo, pinaklo de Silvertino.

» Tie sur Celebdilo estis soleca fenestro en la neĝo, kaj antaŭ ĝi troviĝis malvasta spaco, kapturniga aglonesto super la nebuletoj de l' mondo. Tie la suno brilis arde, sed ĉio sube estis nubvolvita. Li elsaltis, kaj ĝuste kiam mi venis malantaŭe, li denove ekflamis. Ĉeestis neniu atestanto, alie eble en postepoko oni ankoraŭ kantus pri la Lukto sur la Pinto. — Subite Gandalfo ridis. — Sed kion oni dirus kante? Tiuj, kiuj rigardis de fore supozis, ke la monton kronas ŝtormado. Tondron ili aŭdis, kaj fulmo, ili diris, batis al Celebdilo kaj resaltis diserigita je fajrolangoj. Ĉu tio ne sufiĉas? Ĉirkaŭ ni leviĝis granda fumo, nebuleca kaj vapora. Glacio falis kvazaŭ pluvo. Mi deĵetis mian malamikon, kaj li falis el la alta loko kaj frakasis la montflankon, kie li trafis ĝin en sia ruiniĝo. Poste mallumo envolvis min kaj mi forvagis el pensado kaj tempo kaj mi suriris longe vojojn, pri kiuj mi ne rakontos.

» Nuda mi estis resendita — por mallonga tempo ĝis mia tasko estos finita. Kaj nuda mi kuŝis sur la montosupro. La turo malantaŭe estis polviĝinta, la fenestro malaperinta; la ruina ŝtuparo estis ŝtopita per bruligitaj kaj rompitaj ŝtonoj. Mi estis sola, forgesita, sen eskapebleco sur la malmola korno de la mondo. Tie mi kuŝis gapante supren dum la steloj preterradis, kaj ĉiu tago estis tiel longa kiel vivepoko de la tero. Mallaŭte al miaj oreloj venis la akumulita murmurado de ĉiuj landoj: la ekestiĝo kaj la mortado, la kantoj kaj la ploroj, kaj la malrapida ĉiamdaŭra ĝemado de troŝarĝita ŝtono. Kaj fine Gvajhiro la Ventmastro denove trovis min, kaj li levis min kaj forportis min.

» — Mia ĉiama sorto estas ŝarĝi vin, amiko dumbezona, — mi diris.

» — Ŝarĝo vi foje estis, — li respondis, — sed nun ne tia. Malpeza kiel cigna plumo vi estas en mia krifo. La suno trabrilas vin. Efektive al mi ŝajnas, ke vi ne plu bezonas min: se mi lasus vin fali, vi nur flosus laŭ la vento.

» — Ne lasu min fali! — mi elpuŝis, ĉar mi sentis denove en mi vivon. — Portu min al Lotlorieno!

» — Tiel ja ordonis la Damo Galadriela, kiu sendis min serĉi vin, — li respondis.

» Tiel okazis, ke mi venis al Karas Galadono kaj konstatis, ke vi nur antaŭ nelonge foriris. Mi restis tie en la senaĝa tempo de tiu lando, kie la tagoj alportas kuracon, ne kadukiĝon. Kuracon mi trovis, kaj mi estis vestita per blanko. Konsilojn mi donis kaj konsilojn prenis. El tie laŭ strangaj vojoj mi venis, kaj mesaĝojn mi portas al iuj el vi. Al Aragorno mi laŭordone devas diri:

Dunadanoj nun kie, Elesar', Elesaro?
Kial disvagas via parencaro?
Nun la perditoj jam devas eltajdi,
kaj la Griza Korpuso el nordo alrajdi.
Sed mallumas la pado de via fatalo:
mortintoj spionas pri l' voj' al la maro.

Al Legolaso ŝi sendis jenon:

Legolas' Verdfolio, jam en la arbaro
vi vivis en ĝoĵo. Vin gardu de l' maro!
Se borde vi aŭdos la kriĉon de l' mevo,
prosperos ne plu en arbar' via revo.

Gandalfo eksilentis kaj fermis siajn okulojn.

— Do neniun mesaĝon ŝi sendis al mi? — diris Gimlio kaj klinis sian kapon.

— Malklaraj estas ŝiaj vortoj, — diris Legolaso, — kaj malmulton ili signifas al la ricevintoj.

— Tio ne konsolas, — diris Gimlio.

— Kio do? — diris Legolaso. — Ĉu vi volas, ke ŝi parolu al vi malkaŝe pri via morto?

— Jes, se nenio alia dirindus.

— Kio estas tio? — diris Gandalfo, malfermante siajn okulojn. — Jes, mi opinias, ke mi kapablas diveni, kion signifas ŝiaj vortoj. Mi pardonpetas, Gimlio! Mi meditis denove pri la mesaĝoj. Sed efektive ŝi sendis al vi vortojn kaj nek malklarajn, nek malĝojajn.

» — Al Gimlio, filo de Gloino, — ŝi diris, — transdonu saluton de lia Damo. Portanto de miaj haroj, kien ajn vi iras, mia penso akompanas vin. Sed zorgu almeti vian hakilon al la arbo ĝusta!

— En feliĉa horo vi revenis al ni, Gandalfo, — kriis la gnomo,

kapriolante dum li laŭte kantis en la stranga gnoma lingvo. — Ek, ek! — li kriis, svingante sian hakilon. — Ĉar la kapo de Gandalfo estas jam dankata, ni trovu kapon prave fendendan!

— Tia ne estos longe serĉata, — diris Gandalfo, stariĝante de sur la seĝo. — Venu! Ni jam eluzis la tutan tempon, permesatan al kunveno de disestintaj amikoj. Jam necesas rapidi.

Li volvis sin denove per sia malnova ĉifona mantelo, kaj gvidis ilin sur la vojon. Sekvante lin ili subeniris rapide de la alta breto kaj reiris tra la arbaro laŭ la bordo de Entvaŝo. Ili neniun plian vorton parolis ĝis ili staris denove sur la herbo for de la rando de Fangorno. Iliaj ĉevaloj tute ne estis videblaj.

— Ili ne revenis, — diris Legolaso. — La marŝo estos laciga!

— Mi ne marŝos. La tempo urĝas, — diris Gandalfo. Poste, levante sian kapon li eligis longan fajfon. Tiel klara kaj penetra estis la noto, ke la aliaj staris mirigitaj, aŭdante tian sonon el tiuj maljunaj barbaj lipoj. Trifoje li fajfis; kaj tiam ŝajnis al ili, ke ili aŭdas mallaŭtan kaj foran henon de ĉevalo alportita de la ebenaĵo per la orienta vento. Ili atentis scivolante. Post nelonge aŭdiĝis sono de hufoj, komence apenaŭ pli ol tremeto de la tero perceptebla nur de Aragorno, dum li kuŝis sur la herbo, poste pli kaj pli laŭtiĝanta kaj klariĝanta ĝis rapida takto.

— Venas pli ol unu ĉevalo, — diris Aragorno.

— Certe, — diris Gandalfo. — Ni estas tro peza ŝarĝo por unu ĉevalo.

— Ili estas tri, — diris Legolaso, rigardante al la ebenaĵo. — Vidu kiel ili kuras! Jen Hasufelo, kaj jen apud ĝi mia amiko Arodo. Sed estas alia, kiu kuregas antaŭe: ĉevalo tre granda. Ties similulon mi neniam antaŭe vidis.

— Kaj neniam vidos denove, — diris Gandalfo. — Tiu estas Ombrofakso. Ĝi estas la ĉefa en la *Mearasoj*, princo de l' ĉevaloj, kaj eĉ Teodeno, reĝo de Rohano, neniam vidis pli grandiozan. Ĉu ĝi ne brilas kiel arĝento kaj kuras tiel flue, kiel rapida rojo? Ĝi venis por mi: la ĉevalo de la Blanka Rajdanto. Ni iros kune al batalo.

Ĝuste dum parolis la maljuna sorĉisto, la granda ĉevalo paŝegis al ili supren laŭ la deklivo; ĝia felo brilis kaj ĝiaj kolharoj fluis pro la vento de ĝia rapideco. La du aliaj sekvis ne tre malantaŭe. Tuj kiam Ombrofakso vidis Gandalfon, ĝi bridis sian kuradon kaj henis laŭte; poste ĝi trotis milde antaŭen, klinis sian fieran kapon kaj frotis siajn grandajn naztruojn sur la nuko de la maljunulo.

Gandalfo karesis ĝin.

— Longas la vojo el Rivendelo, mia amiko, — li diris, — sed vi estas saĝa kaj rapida kaj venas laŭ la bezono. Malproksimen ni rajdu jam kune, kaj neniam denove disiĝu en tiu ĉi mondo!

Baldaŭ la aliaj ĉevaloj alvenis kaj staris kviete apude, kvazaŭ atendante ordonojn.

— Ni iros tuj al Meduseldo, la halo de via mastro Teodeno, — diris Gandalfo, alparolante ilin seriozmiene. Ili klinis siajn kapojn. — La tempo urĝas, do kun via permeso, miaj amikoj, ni ekrajdos. Mi petagas, ke vi tiom rapidu, kiom vi povas. Hasufelo portos Aragornon kaj Arodo Legolason. Gimlio sidiĝos antaŭ mi, kaj laŭ sia konsento Ombrofakso portos nin ambaŭ. Ni atendos nun nur por iom trinki.

— Jam mi komprenas parton de la pasintnokta enigmo, — diris Legolaso leĝere sursaltante la dorson de Arodo. — Eble niaj ĉevaloj komence fuĝis pro timo, sed poste ili renkontis Ombrofakson, sian ĉefon, kaj salutis ĝin ĝoje. Ĉu vi sciis, ke ĝi estas proksime, Gandalfo?

— Jes, mi sciis. Mi turnis miajn pensojn al ĝi, ordonante ĝin rapidi; ĉar hieraŭ ĝi estis fora en la sudo de tiu ĉi lando. Rapide ĝi portu min reen!

Gandalfo parolis nun al Ombrofakso, kaj la ĉevalo ekiris sufiĉe rapide, sed ne pli rapide ol kapablis la aliaj. Post iomete da tempo ĝi subite sin turnis kaj elektinte lokon, kie la bordoj malpli altis, ĝi travadis la riveron kaj poste kondukis ilin rekte suden sur ebenan terenon, senarban kaj larĝan. La vento pasis grizonde tra la senfinaj mejloj da herbo. Vidiĝis nenia indiko pri vojo aŭ pado, sed Ombrofakso nek haltis nek hezitis.

— Ĝi direktiĝas nun rekte al la haloj de Teodeno sub deklivoj de la Blankaj Montoj, — diris Gandalfo. — Estos pli rapide tiel. La tero estas pli firma en la Orientujo, kie kuŝas la ĉefa vojo norden, trans la rivero, sed Ombrofakso konas la vojon tra ĉiu marĉejo kaj kavaĵo.

Dum multaj horoj ili plurajdis tra la herbejoj kaj riverterenoj. Ofte la herbo tiel altis, ke ĝi atingis ĝis super la genuoj de la rajdantoj, kaj iliaj ĉevaloj ŝajnis naĝi en grizverda maro. Ili alvenis multajn kaŝitajn lagetojn kaj larĝajn areojn de kareksoj balanciĝantaj super malsekaj kaj perfidemaj marĉoj; sed Ombrofakso trovis la vojon kaj la aliaj ĉevaloj sekvis ĝian falĉopaŝadon. Malrapide la suno sinkis el la ĉielo en la okcidenton. Rigardante trans la grandan ebenaĵon, la rajdantoj momente vidis ĝin kvazaŭ ruĝan fajron sinkantan en la herbon. Malalte ĉe rando de l' vidkapablo ŝultroj de la montoj glimis ruĝe ambaŭflanke. Fumo ŝajnis leviĝi kaj malheligi la sunan diskon ĝis koloro de sango, kvazaŭ ĝi ĉendus la herbon subirante sub la randon de la tero.

— Tie kuŝas la Breĉo de Rohano, — diris Gandalfo. — Ĝi estas nun preskaŭ rekte okcidente de ni. Tiudirekte kuŝas Isengardo.

— Mi vidas grandan fumon, — diris Legolaso. — Kio estas tio?

— Batalo kaj milito! — diris Gandalfo. — Rajdu plu!

6

La Reĝo de l’ Ora Halo

Ili daŭre rajdis tra sunsubiro, lanta krepusko kaj densiĝanta nokto. Kiam fine ili haltis kaj elseliĝis, eĉ Aragorno estis malsupla kaj lacega. Gandalfo permesis al ili nur kelkajn horojn da ripozo. Legolaso kaj Gimlio dormis, kaj Aragorno kuŝis plata, etendita surdorse; sed Gandalfo staris apogante sin per sia bastono, rigardante en la mallumon, orienten kaj okcidenten. Ĉio silentis, kaj malestis signo kaj sono de ajna vivantaĵo. La nokton striis longaj nuboj rapidantaj pro malvarmega vento, kiam ili denove leviĝis. Sub la frida lumo ili denove ekiris, rapidaj kiel la taga lumo.

Pasis horoj kaj senhalte ili plurajdis. Gimlio ekdormis kaj falus de la sidloko, se Gandalfo ne kaptus kaj skuus lin. Hasufelo kaj Arodo, lacaj sed fieraj, sekvis sian senlacan estron, grizan ombron apenaŭ videblan antaŭ ili. Pasis la mejloj. La kreskanta luno sinkis en la nuboplenan okcidenton.

Amara frido eniris la aeron. Malrapide en la oriento la mallumo fadis al malvarma grizo. Ruĝaj lumstrioj saltis super la nigraj muroj de Emin Muilo fore maldekstre. Tagiĝo venis klara kaj hela; vento transblovis ilian vojon, rapidanta tra la kurbiĝintaj herboj. Subite Ombrofakso haltis kaj henis. Gandalfo fingromontris antaŭen.

— Vidu! — li kriis, kaj ili levis siajn lacajn okulojn. Antaŭ ili staris la montoj de la sudo: blankpintaj kaj nigre striitaj. La herbejoj ruliĝis kontraŭ la montetojn kiuj ariĝis ĉe la subo kaj fluis en multajn valojn ankoraŭ malklarajn kaj malhelajn, netuŝitajn per la aŭrora lumo, serpentumantajn en la koron de l’ grandaj montoj. Ĝuste antaŭ la vojaĝantoj la plej larĝa el tiuj valoj malfermiĝis kvazaŭ longa golfo inter la montetoj. Fore interne ili ekvidis kunfalintan mont-amason kun unusola alta pinto; ĉe l’ enirejo de la valo sentinelis soleca altaĵo. Ĉirkaŭ ties subo fluis kiel arĝenta fadeno, la rivereto kiu eliris el la valo; sur ties supro ili ekvidis, ankoraŭ tre fore, brileton de la leviĝanta suno, ekbrilon de oro.

— Parolu, Legolaso! — diris Gandalfo. — Sciigu al ni, kion vi vidas tie antaŭ ni!

Legolaso rigardadis antaŭen, ombrumante siajn okulojn kontraŭ la ebenaj strioj de l’ nove supreniĝinta suno.

— Mi vidas blankan rivereton, kiu malsupreniĝas de la neĝoj, — li diris. — Kie ĝi eliras el la ombreco de la valo, leviĝas verda monteto oriente, ĉirkaŭas ĝin barilo kaj forta muro kaj dorna palisaro. Interne leviĝas

tegmentoj de domoj; kaj meze, starigita sur verda teraso, troviĝas granda palaco de homoj. Kaj ŝajnas al miaj okuloj, ke ĝi estas ore tegmentita. Ties lumo brilas malproksimen tra la lando. Oraj estas ankaŭ la fostoj de ĝia pordego. Tie staras homoj en brila armaĵo; sed ĉio alia interne de la kortoj ankoraŭ dormas.

— Edoraso nomiĝas tiuj kortoj, — diris Gandalfo, — kaj Meduseldo estas tiu ora palaco. Tie loĝas Teodeno, filo de Tengelo, reĝo de Rohana Markio. Ni venas kun la tagleviĝo. Jam la vojo etendiĝas klare videbla antaŭ ni. Sed ni devos rajdi pli singarde; ĉar milito disvastiĝas, kaj la rohananoj — la ĉevalmastroj — ne dormas eĉ se tiel ŝajnas de fore. Elingigu neniun armilon, parolu neniun vorton orgojlan, mi konsilas al vi ĉiuj, ĝis ni alvenos antaŭ la seĝon de Teodeno.

La mateno estis hela kaj klara ĉirkaŭ ili, kaj kantis birdoj, kiam la vojaĝantoj venis al la rivereto. Tiu subenfluis rapide sur la ebenaĵon, kaj preter la montetosuboj turniĝis trans ilian vojon laŭ larĝa kurbiĝo, fluante orienten por aldoniĝi al Entvaŝo fore en ties karikŝtopitaj fluejoj. La tero estis verda: en la malsekaj herbejoj kaj laŭlonge de la herbkovritaj bordoj de la rivereto kreskis multaj salikoj. Jam en tiu ĉi suda lando ili ekruĝiĝis ĉe la fingropintoj, sentante alproksimiĝon de la printempo. Tra la rivereto estis pasejo inter malaltaj bordoj multe tramplita pro transiro de ĉevaloj. La vojaĝantoj transiris kaj alvenis larĝan sulkoplenan padon, kondukantan al la altejoj.

Sube de la murhava monteto la pado iris sub la ombron de multaj altaĵetoj altaj kaj verdaj. Sur ties okcidentaj flankoj la herbo estis blanka kvazaŭ pro driva neĝo: etaj floroj kreskis tie kvazaŭ sennombraj steloj inter la herberoj.

— Vidu! — diris Gandalfo. — Kiom belas la helaj okuloj en la herbo! Ĉiamgardo ili nomiĝas, *simbelmyne* en tiu ĉi lando de homoj, ĉar ili burĝonas en ĉiu jarsezono kaj kreskas kie mortintoj ripozas. Jen! Ni venis al la grandaj dolmenoj, kie la prauloj de Teodeno dormas.

— Sep tumuloj maldekstre kaj naŭ dekstre, — diris Aragorno. — Multaj longaj homvivoj pasis de kiam la ora halo estis konstruita.

— Kvincent-foje falis la ruĝaj folioj en Mornarbaro en mia hejmo post tiam, — diris Legolaso, — kaj nur mallonga tempo tio ŝajnas al ni.

— Sed al la rajdantoj de Rohano tio ŝajnas tiel antaŭlonga, — diris Aragorno, — ke la konstruo de tiu ĉi domo estas nur memoro en kanto, kaj la jaroj antaŭ ni estas perditaj en la nebulo de la tempo. Nun ili nomas tiun ĉi landon sia propra hejmo, kaj ilia lingvo estas disigita de ilia norda parencaro. — Poste li ekĉantis en lanta lingvo nekonata al la elfo kaj la gnomo, tamen ili aŭskultis, ĉar enestis forta muzikeco.

— Mi supozas, ke tio estas la lingvo de la rohananoj, — diris Legolaso, — ĉar ĝi similas tiun ĉi landon mem; parte riĉa kaj ruliĝanta, kaj cetere malmola kaj severa kiel la montoj. Sed mi ne konjektas, kion ĝi signifas, krom ke ĝin ŝarĝas la malĝojo de mortemaj homoj.

— Tion ĝi signifas en la Komuna Lingvo, — diris Aragorno, — proksimume tiel mi kapablas traduki:

Kie ĉeval' kaj rajdanto? Kie la korn' sonoranta?
Kie la kask' kaj armaĵo, kaj hela hararo soranta?
Kie la mano sur harpo, kaj ruĝa fajro brulanta?
Kie printemp' kaj rikolto, kaj alta gren' maturanta?
Kiel pluv' sur montet' ili pasis, kiel enherbeja vento;
tagoj postmonte en ombron sinkis al okcidento.
Kiu rikoltos la fumon de l' ligna brul' mortsvenanta,
aŭ vidos fluantan jararon de l' maro revenanta?

Tiel parolis forgesita poeto antaŭlonge en Rohano, memorigante, kiel alta kaj bela estis Eorlo la Juna, kiu rajdis el la nordo; kaj sur la piedoj de lia ĉevalo Felarofo, patro de la ĉevaloj, estis flugiloj. Tiel homoj ankoraŭ kantas en vespero.

Kun tiuj vortoj la vojaĝantoj preterpasis la silentajn tumulojn. Sekvante la serpentuman padon supren laŭ la verdaj ŝultroj de la montetoj, ili fine venis ĝis la larĝaj ventblovitaj muroj kaj la pordego de Edoraso.

Tie sidis multaj viroj en helaj maŝkirasoj, kiuj tuj salte stariĝis kaj baris la vojon per lancoj.

— Haltu, fremduloj ĉi tie nekonataj! — ili kriis en la lingvo de Rajdmarkio, postulante la nomojn kaj celon de la nekonatoj. Miro vidiĝis en iliaj okuloj sed malmulte da amikemo, kaj ili rigardis sombre al Gandalfo.

— Mi bone komprenas vian parolon, — li respondis en la sama lingvo, — tamen tion kapablas malmultaj fremduloj. Kial do vi ne parolas en la Komuna Lingvo laŭ la kutimo de la Okcidento, se vi deziras respondon?

— La volo de reĝo Teodeno estas, ke neniu eniru lian pordegon krom tiuj, kiuj scipovas nian lingvon kaj estas niaj amikoj, — respondis unu el la gardistoj. — Neniuj estas bonvenaj ĉi tie dum tagoj de milito krom niaj propraj homoj kaj tiuj, kiuj venas de Mundburgo en la lando Gondoro. Kiuj vi estas, venintaj senĝene trans la ebenaĵon tiel strange vestitaj, rajdante ĉevalojn tiel similajn al niaj propraj ĉevaloj? Longe ni gardis ĉi tie, kaj ni gvatis vin defore. Neniam ni vidis aliajn rajdantojn tiel strangajn, nek alian ĉevalon pli fieran ol tiu, kiu portas vin. Ĝi estas unu el la *Mearasoj*, krom se niajn okulojn envultas la sorĉo. Diru, ĉu vi ne estas sorĉisto, spiono de Sarumano, aŭ fantomoj liametiaj? Parolu jam kaj rapide!

— Ni neniel estas fantomoj, — diris Aragorno, — nek trompas vin viaj okuloj. Ĉar efektive tiuj ĉi estas viaj propraj ĉevaloj, kiujn ni rajdas, kiel vi bone sciis antaŭ ol vi demandis laŭ mia opinio. Sed malofte ŝtelinto rajdas hejmen al la stalo. Jen estas Hasufelo kaj Arodo, kiujn Eomero, la Tria Marŝalo de Markio, pruntedonis al ni antaŭ nur du tagoj. Ni revenigas ilin nun ĝuste kiel ni promesis al li. Ĉu Eomero do ne jam revenis kaj avertis pri nia alveno?

Esprimo ĝenata aperis en la okuloj de la gardisto.

— Pri Eomero mi nenion havas por diri, — li respondis. — Se tio, kion vi diras al mi, estas vero, sendube Teodeno jam aŭdis pri ĝi. Eble via alveno estis ne tute neantaŭvidita. Antaŭ nur du noktoj Vermlango venis al ni kaj diris, ke laŭ la volo de Teodeno neniu fremdulo trapasu jenan pordon.

— Vermlango? — diris Gandalfo, abrupte rigardante la gardiston. — Diru nenion pli! Mia komisio celas ne Vermlangon, sed la Mastron mem de Markio. Mi hastas. Ĉu vi iros aŭ sendos iun por diri, ke ni venis? — Liaj okuloj ekbriletis sub liaj profundaj brovoj dum li turnis sian rigardon al la viro.

— Jes, mi iros, — tiu respondis malrapide. — Sed kiujn nomojn mi raportu? Kaj kion mi diru pri vi? Maljuna kaj laca vi ŝajnas nun, kaj tamen vi estas danĝera kaj severa interne, mi taksas.

— Bone vi vidas kaj parolas, — diris la sorĉisto. — ĉar mi estas Gandalfo. Mi revenis. Kaj jen! Ankaŭ mi revenigas la ĉevalon. Jen estas Ombrofakso la Granda, kiun povas kvietigi neniu alia mano. Kaj jen apud mi estas Aragorno, filo de Aratorno, heredinto de reĝoj, kaj ĝuste al Mundburgo li celas. Jen estas ankaŭ elfo Legolaso kaj gnomo Gimlio, niaj kamaradoj. Iru jam kaj diru al via mastro, ke ni estas ĉe lia pordo kaj volas alparoli lin, se li permesos al ni veni en lian halon.

— Strangajn nomojn vi donas efektive! Sed mi raportos ilin laŭ via ordono kaj ekkonos la volon de mia mastro, — diris la gardisto. — Atendu ĉi tie iomete kaj mi reportos al vi tian respondon, kia plaĉos al li. Ne tro esperu! Jen estas tagoj mallumaj. — Li rapide foriris, lasante la fremdulojn sub atenta prizorgo de siaj kamaradoj.

Post kelka tempo li revenis.

— Sekvu min! — li diris. — Teodeno permesas al vi eniri; sed ĉiun armilon portatan de vi, eĉ se nur bastonon, vi devos lasi ĉe la sojlo. La pordistoj retenos ilin.

Oni svinge malfermis la malhelan pordegon. La vojaĝantoj eniris, marŝante spalire malantaŭ sia gardanto. Ili trovis larĝan padon pavimitan per elhakitaj ŝtonoj, jen serpentumantan supren jen grimpantan laŭ mallongaj aroj da metie metitaj ŝtupoj. Multajn domojn konstruitajn el ligno

kaj multajn sombrajn pordojn ili preterpasis. Apud la pado en ŝtona kanelo fluis rojo da klara akvo brilanta kaj tintanta. Fine ili alvenis la verton de la deklivo. Tie staris alta podio super verda teraso, sube de kiu hela fonto elsputiĝis el ŝtono ĉizita laŭ formo de ĉevala kapo; sube estis larĝa baseno, el kiu verŝiĝis la akvo kaj plenigis la falantan rojon. Supren laŭ la verda teraso kondukis ŝtuparo ŝtona, alta kaj larĝa, kaj ambaŭflanke de la plej supra ŝtupo estis ŝtonhakitaj seĝoj. Tie sidis pliaj gardistoj kun elingigitaj glavoj sur siaj genuoj. Ties oraj hararoj estis plektitaj sur iliaj ŝultroj; la suno estis blazonita sur iliaj verdaj ŝildoj, iliaj longaj maŝkirasoj estis hele poluritaj, kaj kiam ili stariĝis, ili ŝajnis pli altaj ol la mortemaj homoj.

— Jen antaŭ vi estas la pordo, — diris la gvidinto. — Mi devos nun reiri al mia ĉeporda deĵoro. Adiaŭ! Kaj la Mastro de Markio traktu vin favore!

Li returnis sin kaj rapide reiris laŭ la pado. La aliaj grimpis la longan ŝtuparon rigardate de la altaj pordistoj. Ili nun staris supre en silento kaj diris neniun vorton, ĝis Gandalfo elpaŝis sur la pavimitan terason supre de la ŝtuparo. Tiam subite per klaraj voĉoj ili prononcis ĝentilan saluton en la propra lingvo.

— Saluton, venintoj el la malproksimo! — ili diris kaj turnis la tenilojn de siaj glavoj al la vojaĝantoj kiel signon de paco. Verdaj gemoj ekflagris en la sunlumo. Poste unu el la gardantoj paŝis antaŭen kaj parolis en la Komuna Lingvo.

— Mi estas la pordogardisto de Teodeno, — li diris. — Hamo mi nomiĝas. Nun mi devas ordoni, ke vi lasu viajn armilojn antaŭ ol eniri.

Legolaso enmanigis al li sian arĝenttenilan stileton, sian sagujon, kaj sian pafarkon.

— Konservu ilin zorge, — li diris, — ĉar ili devenas de la Ora Arbaro, kaj donis ilin al mi la Damo de Lotlorieno.

Miro aperis en la okuloj de la viro, kaj li rapide kuŝigis la armilojn apud la muron, kvazaŭ li timus tuŝi ilin.

— Neniu tuŝos ilin, mi promesas, — li diris. Aragorno staris dum kelka tempo hezitante.

— Ne estas mia volo, — li diris, — flankenmeti mian glavon aŭ enmanigi Andurilon al ajna aliulo.

— Estas la volo de Teodeno, — diris Hamo.

— Ne estas al mi klare, ke la volo de Teodeno, filo de Tengelo, kvankam li estas mastro de Markio, devus superi la volon de Aragorno, filo de Aratorno, heredonto de Elendilo el Gondoro.

— Tiu ĉi domo estas de Teodeno, ne de Aragorno, eĉ se tiu estus reĝo de Gondoro en la sidejo de Denetoro, — diris Hamo, rapide paŝante antaŭ la pordon kaj barante la vojon. Lia glavo jam estis en lia mano kun la pinto

direktita al la fremduloj.

— Jen parolo superflua, — diris Gandalfo. — Ne necesas la postulo de Teodeno, sed senutilas rifuzi. Reĝo trudas sian volon en sia propra halo, ĉu fole ĉu saĝe.

— Vere, — diris Aragorno. — Kaj mi farus laŭ ordono de dommastro, eĉ se tio ĉi estus kabano de arbhakisto, se mi portus iun ajn glavon krom Andurilon.

— Kiel ajn ĝi nomiĝas, — diris Hamo, — ĉi tie vi demetos ĝin, se vi ne volas lukti sola kontraŭ la viroj de Edoraso.

— Ne sola! — diris Gimlio, fingrumante la klingon de sia hakilo kaj sombre rigardante supren al la gardisto, kvazaŭ tiu estus arbido, kiun Gimlio emus faligi. — Ne sola!

— Trankviliĝu! — diris Gandalfo. — ĉi tie ni ĉiuj estas amikoj. Aŭ devus esti, ĉar la ridado de Mordoro estos nia sola rekompenco, se ni kverelos. Mia komisio urĝas. Jen almenaŭ glavo *mia*, bonulo Hamo. Gardu ĝin zorge. Glamdringo ĝi nomiĝas, ĉar la elfoj kreis ĝin antaŭlonge. Nun lasu min trapasi. Venu, Aragorno!

Malrapide Aragorno malbukis sian zonon kaj mem lokis sian glavon vertikale kontraŭ la muron.

— Ĉi tien mi lokas ĝin, — li diris, — sed mi ordonas al vi ne tuŝi ĝin, nek permesi ke iu alia almetu manon sur ĝin. En tiu ĉi elfa ingo loĝas la Glavo-Kiu-Estis-Rompita kaj estas refarita. Telĉaro unue kreis ĝin en la profundo de la tempo. Morto trafos iun ajn, kiu elingigas la glavon de Elendilo, krom la Elendila heredonto.

La gardisto retropaŝis kaj mire rigardis Aragornon.

— Ŝajnas, ke vi venis per la flugiloj deiukanto elforgesitaj tagoj, — li diris. — Okazos, mastro, laŭ via ordono.

— Nu, — diris Gimlio, — se ĝi havos la societon de Andurilo, mia hakilo povos sen honto resti ĉi tie, — kaj li kuŝigis ĝin sur la plankon.

— Nu do, se ĉio estas laŭ via deziro, ni iru paroli kun via mastro. La gardisto plu hezitis.

— Via bastono, — li diris al Gandalfo. — Pardonu min, sed ankaŭ ĝi devus esti lasita ĉe la pordo.

— Sensencaĵo! — diris Gandalfo. — Prudento estas inda, sed malĝentilo estas malinda. Mi maljunas. Se mi ne rajtas apogi min per mia bastono dumire, mi sidos ĉi tie ekstere, ĝis plaĉos al Teodeno ellamiri mem por interparoli kun mi.

Aragorno ridis:

— Ĉiu havas ion tro valoran por esti fidata al aliulo. Sed ĉu vi volos disigi maljunulon de ties marŝbastono? Vidu, ĉu vi ne permesos al ni eniri?

— Bastono en la manoj de sorĉisto eble estas pli ol maljunula apogilo, — diris Hamo. Li intense rigardis la fraksenan bastonon per kiu Gandalfo sin subtenis. — Tamen malgraŭ duboj viro brava fidos sian propran saĝon. Mi kredas, ke vi estas amikoj kaj personoj honorplenaj, kiuj malhavas celon malvirtan. Vi rajtas eniri.

Nun la gardistoj levis la pezajn bartrabojn de la pordo kaj svingis malrapide internen la grumblantajn pordoklapojn sur grandaj ĉarniroj. La vojaĝantoj eniris. La interno ŝajnis malhela kaj varma post la klara aero sur la deklivo. La halo estis longa kaj larĝa kaj plena je ombroj kaj duonlumoj; fortikaj pilastroj subtenis ĝian altan tegmenton. Sed kelkloke brilaj subradioj enfalis laŭ glimaj strioj el la orientaj fenestroj, altaj sub la profundaj tegmentorandoj. Tra luko sur la tegmento, super maldensaj bukletoj da eliranta fumo la ĉielo montriĝis pala kaj blua. Kiam iliaj okuloj kutimiĝis, la vojaĝantoj konstatis, ke la plankon pavimas ŝtonoj multkoloraj; disbranĉaj runoj kaj strangaj blazonoj interplektiĝis subpiede. Ili vidis nun, ke la pilastroj estas riĉe ĉizitaj, glimante pale je oro kaj duonvidataj koloroj. Multaj teksitaj tolaĵoj pendis sur la muroj, kaj trans ties larĝajn spacojn marŝis figuroj el antikvaj legendoj, iuj palaj pro jarpasado, iuj nigretiĝaj en la ombro. Sed sur unu figuron falis la sunlumo: junulo sur blanka ĉevalo. Li blovis grandan kornon, kaj liaj flavaj haroj disbloviĝis pro la vento. La ĉevala kapo estis levita, kaj ties naztruoj estis larĝaj kaj ruĝaj dum ĝi henis, flarante batalon fore. Ŝaŭma akvo, verda kaj blanka, fluis kaj kurbiĝis ĉirkaŭ ties genuoj.

— Vidu Eorlon la Junan! — diris Aragorno. — Tiel li elrajdis el la nordo al la batalo de la kampo de Celebranto.

Nun la kvar kunuloj antaŭeniris, preter la klara lignofajro brulanta sur la longa fajrejo meze de la halo. Poste ili haltis. Ĉe l' fora ekstremo de la domo, aliflanke de la fajrejo kaj frontante norden al la pordo, estis podio triŝtupa, kaj meze de la podio estis granda orumita trono. Sur ĝi sidis viro tiel kurbiĝinta, ke li ŝajnis preskaŭ nano; sed lia blanka hararo estis longa kaj densa kaj descendis grandplektaĵe el sub maldika ora cirklaĵo metita sur lia kapo. Centre sur lia frunto brilis unuopa blanka diamanto. Lia barbo kuŝis kvazaŭ neĝo sur liaj genuoj; sed liaj okuloj daŭre brulis je brila lumo, ekflagrante dum li rigardis la fremdulojn. Malantaŭ la trono staris virino blankvestita. Ĉe liaj piedoj sur la ŝtupoj sidis ŝrumpinta virfiguro kun pala saĝa vizaĝo kaj pezpalpebraj okuloj.

Okazis silento. La maljunulo ne moviĝis sur sia seĝo. Finfine Gandalfo ekparolis:

— Saluton, Teodeno, filo de Tengelo! Mi revenis. Ĉar jen! La ŝtormo venas, kaj nun ĉiuj amikoj devus kunveni por eviti, ke ĉiu unuope detruiĝu.

Malrapide la maljunulo stariĝis, peze apogante sin per mallonga nigra bastono kun tenilo el blanka osto; kaj nun la fremduloj vidis, ke malgraŭ sia kurbiĝo li ankoraŭ estas alta kaj dum juneco certe estis vere alta kaj fiera.

— Mi salutas vin, — li diris, — kaj eble vi atendas bonvenigon. Sed efektive via bonvenigo ĉi tie estas dubinda, Mastro Gandalfo. Vi ĉiam estas heroldo de mizero. Perturboj sekvas vin kvazaŭ korvoj, kaj ĉiam ju pli ofte des pli malbone. Mi ne misinformos vin: kiam mi aŭdis, ke Ombrofakso revenis senrajdiste, mi ĝojis pro l' reveno de la ĉevalo, sed eĉ pli pro la manko de l' rajdinto; kaj kiam Eomero alportis la informon, ke vi finfine foriris al via lasta hejmo, mi ne funebris. Sed informoj el malproksimo malofte fidindas. Jen vi denove venis! Kaj akompanas vin pli fiaj malbonoj ol antaŭe, kiel antaŭsupozeble. Kial mi bonvenigu vin, Gandalfo Ŝtormkorvo? Klarigu al mi tion. — Li malrapide residiĝis sur sian seĝon.

— Vi parolas prave, mastro, — diris la palulo sidanta sur la ŝtupoj de la podio. — Ankoraŭ ne pasis kvin tagoj de kiam venis la amara sciigo, ke via filo Teodredo estas mortigita sur la okcidentaj terenoj: via dekstra mano, la Dua Marŝalo de Markio. Eomero estas malmulte fidinda. Malmultaj viroj restus por gardi viajn murojn se al li estus permesate regi. Kaj ĝuste nun ni ekscias el Gondoro, ke la Malluma Mastro ekmoviĝas en la oriento. Tia estas la horo en kiu elektas reveni jena vagulo. Kial efektive ni bonvenigu vin, Mastro Ŝtormkorvo? *Láthspell* mi nomas vin, Misheroldo; kaj misheroldo estas misa gasto, oni diras. — Li ridis senamuze, dum li levis momente siajn pezajn palpebrojn kaj rigardis malhelokule la fremdulojn.

— Oni taksas vin saĝa, mia amiko Vermlango, kaj sendube vi forte subtenas vian estron, — respondis Gandalfo per mola voĉo. — Tamen dumaniere oni povas veni kun malagrablaj novaĵoj. Oni povas veni kiel misfaranto; aŭ povas esti tia, kia ne enmiksiĝas, kaj venas nur por havigi helpon en tempo de krizo.

— Tio estas vera, — diris Vermlango, — sed ekzistas tria speco: ronĝantoj de ostoj, enmiksiĝemuloj en alies mizeron, karnomanĝaj birdoj kiuj dikiĝas pro la milito. Kian helpon vi iam ajn alportis, Ŝtormkorvo? Kaj kian helpon vi alportas nun? Nian helpon vi serĉis, kiam vi lastfoje estis ĉi tie. Tiam mia mastro ordonis, ke vi elektu iun ajn ĉevalon laŭ via plaĉo kaj foriru; kaj mirige al ĉiuj vi insolente forprenis Ombrofakson. Mia estro profunde malĝojis; sed al iuj ŝajnis, ke por rapidigi vin el la lando la prezo ne estis tro alta. Mi konjektas, ke tre verŝajne okazos ankoraŭfoje same: vi serĉos helpon prefere ol liveri ĝin. Ĉu vi kunportis virojn? Ĉu vi alportis ĉevalojn, glavojn, lancojn? Tion mi nomus helpo; tion ni bezonas nuntempe. Sed kiuj estas jenaj, kiuj sekvas vian voston? Tri ĉifonaj vaguloj grizvestitaj, kaj vi mem la plej almozul-aspekta el la kvar!

— La ĝentileco en via halo lastatempe iom reduktiĝis, Teodeno, filo de Tengelo, — diris Gandalfo. — Ĉu la mesaĝisto ĉe via pordo ne raportis la nomojn de miaj kunuloj? Malofte ricevis tri tiajn gastojn iu mastro de Rohano. Ili lasis ĉe via pordo armilojn, kiuj samvaloras kiel multaj mortemuloj, eĉ plej potencaj. Grizas iliaj vestaĵoj, ĉar vestis ilin la elfoj, kaj tiel ili trapasis la ombron de grandaj danĝeroj ĝis via halo.

— Do estas vere, kiel raportis Eomero, ke vi ligiĝis kun la Sorĉistino de la Ora Arbaro, ĉu? — diris Vermlango. — Tio ne estas miriga: araneaĵoj da trompo ĉiam estis teksitaj en Dvimordeno.

Gimlio faris unu paŝon antaŭen, sed subite li sentis la manon de Gandalfo kroĉiĝi al lia ŝultro, kaj li haltis starante rigida kiel ŝtono:

En Dvimorden', en Lorieno
maloftis homa trapromeno,
malofte mortemuloj vidis
la lumon kies bril' egidis.
Galadriel'! Galadriela!
Tre klaras akve via ŝvelo;
la stel' en via mano blankas;
folioj, tero, ja senmankas
en Dvimorden', en Lorieno
pli bele ol la homkompreno.

Tiel Gandalfo mallaŭte kantis, kaj poste li subite ŝanĝiĝis. Flankenĵetinte sian ĉifonan mantelon li stariĝis kaj ne plu apogis sin per sia bastono; kaj li parolis per voĉo klara kaj malvarma.

— Saĝuloj parolas nur pri tio, kion ili konas, Grimo, filo de Galmodo. Malsprita vermo vi fariĝis. Sekve silentu kaj retenu vian forkan langon malantaŭ la dentoj. Mi trapasis fajron kaj morton ne por vortskermi per ruzaĵoj kun servisto ĝis la fulmo trafos.

Li levis sian bastonon. Aŭdiĝis tondrobato. La sunlumo estingiĝis ĉe la orientaj fenestroj; la tuta halo iĝis malluma kiel nokto. La fajro malardis je sordinita braĝo. Nur Gandalfo estis videbla, staranta blanka kaj alta antaŭ la nigrigita fajrujo.

En la malhelo oni aŭdis la siblon de l' voĉo de Vermlango:

— Ĉu mi ne konsilis al vi, mastro, malpermesi lian bastonon? Tiu stultulo Hamo perfidis nin!

Vidiĝis flagro, kvazaŭ fulmo trabreĉus la tegmenton. Poste ĉio estis silenta. Vermlango dissterniĝis survizaĝe.

— Nun Teodeno, filo de Tengelo, ĉu vi aŭskultos min? — diris Gandalfo. — Ĉu vi petas helpon? — Li levis sian bastonon kaj indikis altan

fenestron. Tie la mallumo ŝajnis heliĝi, kaj tra la fendo videblis, alte kaj fore, peco da brila ĉielo. — Ne ĉio estas malluma. Trovu kuraĝon, Mastro de Markio; ĉar pli bonan helpon vi ne trovos. Nenian konsilon ni havas por malesperantoj. Tamen konsilon mi povus doni kaj vortojn mi povus diri al vi. Ĉu vi volas aŭdi ilin? Ili ne estas por ĉies oreloj. Mi ordonas, ke vi venu eksteren antaŭ vian pordon kaj rigardu ĉirkaŭen. Tro longe vi sidadis en ombroj kaj fidis al torditaj rakontoj kaj oblikvaj instigoj.

Malrapide Teodeno lasis sian tronon. Malforta lumo ekkreskis denove en la halo. La virino hastis al la flanko de la reĝo, kaptante lian brakon, kaj per hezitemaj paŝoj la maljunulo depodiiĝis kaj trapaŝis mutece la halon. Vermlango restis kuŝanta sur la planko. Ili alvenis la pordon kaj Gandalfo frapis:

— Malfermu! La Mastro de Markio elvenas!

La pordoklapoj malferme ruliĝis kaj enfajfis akra aero. Vento blovis ĉe la monteto.

— Sendu viajn gardistojn al la ŝtupara subo, — diris Gandalfo. — Kaj vi, damo, lasu lin por iom da tempo kun mi. Mi prizorgos lin.

— Iru, Eovina, fratina filino! — diris la maljuna reĝo. — La tempo de timo jam pasis.

La virino turniĝis kaj reiris malrapide en la domon. Trapasante la pordon ŝi retrorigardis. Serioza kaj pensema estis ŝia rigardo, dum ŝi rigardis la reĝon kun friska kompato en la okuloj. Tre bela estis ŝia vizaĝo, kaj ŝiaj longaj haroj similis riveron el oro. Gracila kaj alta ŝi estis en sia blanka robo ĉirkaŭita de arĝento; sed forta ŝi ŝajnis kaj senceda kiel ŝtalo, filino de reĝoj, Tiel Aragorno la unuan fojon en plena taglumo vidis Eovinan, damon de Rohano, kaj taksis ŝin belega, belega kaj frida, kiel mateno de pala printempo, ankoraŭ ne viriniĝinta. Kaj ŝi nun subite konsciiĝis pri li: alta heredanto de reĝoj, saĝa pro multaj vintroj, grizmantela, kaŝanta potencon kiun ŝi tamen sentis. Dum momento ŝtone senmova ŝi staris, poste turniĝinte rapide ŝi estis for.

— Nun, mastro, — diris Gandalfo, — rigardu vian landon! Spim denove la liberan aeron!

El la portiko supre de la alta teraso ili povis vidi post la rojo la verdajn kampojn de Rohano fadantaj al dista grizo. Kurtenoj da ventblovata pluvo suben oblikvis. La ĉielo supre kaj okcidente ankoraŭ malhelis pro tondro, kaj fora fulmo flagris inter la pintoj de kaŝitaj montetoj. Sed la vento jam blovis el la nordo, kaj la ŝtormo veninta el la oriento estis forpasanta, forruliĝanta suden al la maro. Subite tra ŝirtruo en la nuboj malantaŭ ili strio da sunlumo ponardis malsupren.

La falantaj pluvoj glimis arĝente, kaj malproksime la rivero ekbriletis

kiel muara vitro.

— Ne estas tiel mallume ĉi tie, — diris Teodeno.

— Ne, — diris Gandalfo. — Kiel ankaŭ maljuneco ne ŝarĝas viajn ŝultrojn tiom peze, kiom deziras iuj, ke vi sentu. Forĵetu vian apogilon!

El la mano de l' reĝo la nigra bastono falis klake sur la ŝtonojn. Li rektigis sin, malrapide kiel homo rigida pro longa kurbiĝo al teda tasko. Jam alta kaj rekta li staris, kaj liaj okuloj bluis, dum li rigardis la malfermiĝintan ĉielon.

— Malhelaj estis miaj revoj lastatempe, — li diris, — sed mi sentas min kvazaŭ nove vekiĝinta. Mi jam volas, ke vi venintus pli frue, Gandalfo. Ĉar mi timas, ke vi venis tro malfrue, nur por spekti la lastajn tagojn de mia domo. Ne longe jam staros la alta halo, konstruita de Brego, filo de Eorlo. Fajro voros la altan sidejon. Kion fari?

— Multon, — diris Gandalfo. — Sed unue venigu Eomeron. Ĉu mi ne prave konjektas, ke vi enkarcerigis lin laŭ konsilo de Grimo, kiun ĉiuj krom vi nomas Vermlango?

— Vere, — diris Teodeno. — Li ribelis kontraŭ miaj ordonoj kaj mortminacis Grimon en mia halo.

— Oni povas ami vin kaj tamen ne ami Vermlangon aŭ ties konsilojn, — diris Gandalfo.

— Povas esti. Mi agos laŭ via peto. Voku Hamon al mi. Ĉar li pruviĝis nefidinda kiel pordgardisto, li fariĝu mesaĝisto. Kulpulo venigos al juĝado kulpulon, — diris Teodeno, kaj lia voĉo estis severa, tamen li rigardis Gandalfon kaj ridetis, kaj kiam li tion faris multaj zorgosulketoj forglatiĝis kaj ne revenis.

Kiam Hamo estis vokita kaj foriris, Gandalfo gvidis Teodenon al ŝtona seĝo kaj poste sidigis sin antaŭ la reĝo sur la plej supra ŝtupo. Aragorno kaj ties kunuloj staris proksime.

— Mankas tempo rakonti ĉion, kion vi devus aŭdi, — diris Gandalfo. — Tamen se mia espero ne estos trompita, venos okazo postnelonge kiam mi povos paroli pli abunde. Vidu! Vi eniris danĝeron pli grandan eĉ ol la ruzo de Vermlango kapablus teksi en viajn revojn. Sed jen! Vi ne plu revas. Vi vivas. Gondoro kaj Rohano ne staras solaj. La malamiko estas pli forta ol ni scias taksi, tamen ni havas esperon kiun li ne divenis.

Rapide nun Gandalfo paroladis. Lia voĉo estis mallaŭta kaj kaŝema, kaj neniu krom la reĝo aŭdis tion, kion li diris. Sed ĉiam dum li parolis, lumo brilis pli hele en la okuloj de Teodeno, kaj fine li stariĝis de la seĝo ĝis sia plena kresko, kaj Gandalfo estis apud li, kaj kune ili elrigardis de tiu alta loko orienten.

— Vere, — diris Gandalfo, jam per la voĉo laŭta, akra kaj klara,

— tiuvoje troviĝas nia espero, kie sidas nia plej granda timo. La sorto ankoraŭ pendas per fadeno. Tamen ankoraŭ restas espero, se nur ni povos stari nevenkitaj dum iomete da tempo.

Nun ankaŭ la aliaj turnis sian rigardon orienten. Trans la disigajn leŭgojn da tero, tre foren ili rigardis ĝis la rando de l' vidpovo, kaj espero kaj timo pluportis iliajn pensojn trans malhelajn montojn ĝis la Lando de la Ombro. Kie nun estis la Ringoportanto? Kiel maldika estis la fadeno, per kiu la sorto ankoraŭ pendis! ŝajnis al Legolaso, strečanta siajn forvidajn okulojn, ke li ekvidas ekbrilon de blanko: eble tre malproksime la sunlumo flagretas sur pinaklo de la Turego Garda. Kaj eĉ pli fore, senfine neatingebla kaj tamen aktuala minaco, estis eta flamlango.

Malrapide Teodeno residiĝis, kvazaŭ laceco ankoraŭ baraktus por regi lin kontraŭ la volo de Gandalfo. Li turniĝis kaj rigardis sian domegon.

— Ve! — li diris, — ĉar jenaj misaj tagoj estas miaj, kaj venas dum mia maljunaĝo anstataŭ tiu trankvilo, kiun mi meritas. Ve pri Boromiro la brava! La junaj pereas kaj la maljunaj restadas, velkantaj. — Li kroĉis siajn genuojn per siaj faltitaj manoj.

— Viaj fingroj pli bone memorus sian iaman potencon, se ili kroĉus glavtenilon, — diris Gandalfo.

Teodeno stariĝis kaj metis manon al sia flanko; sed neniu glavo pendis če lia zono. — Kien Grimo formetis ĝin? — li murmuris subvoče.

— Akceptu tiun ĉi, kara estro! — diris klara voĉo. — Ĝi estis ĉiam je via servo. — Du viroj estis malantaŭe, venintaj supren laŭ la ŝtuparo kaj nun staris je kelkaj paŝoj de la supro. Eomero estis tie. Neniu kasko estis sur lia kapo, mankis maŝkiraso sur lia brusto, sed en la mano li tenis elingigitan glavon; kaj genuante li proponis la tenilon al sia mastro.

— Kiel okazas tio ĉi? — diris Teodeno severe. Li turnis sin al Eomero, kaj la viroj mire rigardis lin, starantan jam fiere kaj rekte. Kie estis la maljunulo, kiun ili lasis kaŭranta sur sia seĝo aŭ apoganta sin per la bastono?

— Jen mia faro, mastro, — diris Hamo tremante. — Mi komprenis, ke Eomero estis liberigota. Tiom da ĝojo plenigis mian koron, ke eble mi eraris. Tamen, ĉar li estis denove libera kaj estas Marŝalo de Markio, mi alportis lian glavon laŭ lia ordono.

— Por meti ĝin če viajn piedojn, mia mastro, — diris Eomero. Dum momenta silento Teodeno staris rigardante suben al Eomero, dum tiu plu genuis antaŭ li. Neniu el ambaŭ moviĝis.

— Ĉu vi ne volas akcepti la glavon? — diris Gandalfo. Malrapide Teodeno etendis sian manon. Kiam liaj fingroj kroĉis la tenilon, ŝajnis al la rigardantoj, ke firmo kaj forto revenis al lia maldika brako. Subite li levis la

klingon kaj svingis ĝin briletantan kaj fajfantan en la aero. Poste li eligis laŭtan krion. Lia voĉo sonoris klare, kiam li ĉantis en la lingvo de Rohano vokon al sinarmado:

Leviĝu, leviĝu, Teodenaj rajdantoj!
Bravo vekiĝas, morn' oriente.
Selu ĉevalojn, sonu la kornoj!
Ek, Eorlidoj!

La gardistoj, supozante sin alvokitaj, suprensaltis laŭ la ŝtuparo. Ili rigardis mirigite sian mastron, kaj poste samtempe elingigis siajn glavojn kaj kuŝigis ilin antaŭ liaj piedoj.

— Ordonu al ni! — ili diris.

— *Westu Théoden hál*! — kriis Eomero. — Ĝojigas nin vidi, ke vi reeniras vian propraĵon. Neniam plu estos dirate, Gandalfo, ke vin akompanas nur malbono!

— Reprenu vian glavon, Eomero, fratina filo! — diris la reĝo. — Iru, Hamo, serĉi mian propran glavon! Grimo havas ĝin en sia prizorgo. Aligu ankaŭ lin al mi. Nu, Gandalfo, vi diris, ke vi havas konsilon transdonotan. Kion vi konsilas?

— Vi mem jam plenumis ĝin, — respondis Gandalfo. — Fidi al Eomero prefere ol al homo kurbmensa. Forĵeti bedaŭron kaj timon. Fari agon necesan. Ĉiu viro rajdkapabla estu tuj sendita okcidenten, kiel Eomero konsilis: ni devos unue pereigi la minacon de Sarumano dum restas tempo. Se ni malsukcesos, ni venkiĝos. Se ni sukcesos — tiam ni frontos la postan taskon. Dume via popolo postlasata, la virinoj, infanoj kaj gemaljunuloj, devus fuĝi al la rifuĝejoj, kiujn vi havas en la montaro. Ĉu tiuj ne estis pretigitaj ĝuste por tia misa tago, kia la jena? Ili kunprenu provianton, sed ne prokrastu nek ŝarĝu sin per trezoroj egaj aŭ etaj. Iliaj vivoj estas minacataj.

— Tiu konsilo nun ŝajnas al mi bona, — diris Teodeno. — Mia tuta popolo pretiĝu! Sed vi, miaj gastoj — vere vi diris, Gandalfo, ke la ĝentileco de mia halo reduktiĝis. Vi rajdis tra la nokto, kaj la mateno triviĝas. Vi havis nek dormon, nek nutraĵon. Gastodomo estos pretigita: tie vi dormos post manĝado.

— Ne, reĝo, — diris Aragorno. — Ankoraŭ ne ripozos la lacegaj. La viroj de Rohano devos elrajdi hodiaŭ, kaj ni rajdos kun ili: hakilo, glavo kaj pafarko. Ni kunportis ilin ne por apogi al via muro, Mastro de Markio. Kaj mi promesis al Eomero, ke lia kaj mia glavoj estos elingigitaj kune.

— Jam efektive venko espereblas! — diris Eomero.

— Espereblas, jes, — diris Gandalfo. — Sed Isengardo fortas. Kaj aliaj

danĝeroj ĉiam proksimiĝas. Ne prokrastu, Teodeno, post nia foriro. Gvidu viajn homojn rapide al la sekurejo Dunharo en la montaro!

— Ne, Gandalfo! — diris la reĝo. — Vi subtaksas vian kuraclerton. Ne okazos tiele. Mi mem iros al la milito, por perei se necese ĉe la batalfronto. Tiel mi dormos pli kontente.

— Tial eĉ malvenko de Rohano estos glora en la kantoj, — diris Aragorno. La apudstarantaj armitoj kunligis siajn armilojn, kriante:

— La Mastro de Rohano rajdos! Ek Eorlidoj!

— Sed via popolo devos ne esti samtempe sen armiloj kaj sen paŝtisto, — diris Gandalfo. — Kiu gvidos ilin kaj regos ilin anstataŭ vi?

— Mi pripensos tion antaŭ ol foriri, — respondis Teodeno. — Jen venas mia konsilisto.

Tiumomente Hamo revenis el la halo. Malantaŭ li, timvringate inter du viroj, venis Grimo la Vermlanga. Lia vizaĝo tre blankis. Liaj okuloj palpebrumis pro la sunlumo. Hamo genuis kaj etendis al Teodeno longan glavon en ingo ore agrafita kaj inkrustita je verdaj gemoj.

— Mastro, jen Herugrimo, via antikva glavo, — li diris. — Ĝi estas trovita en lia kesto. Malvolonte li transdonis la ŝlosilojn. Multaj aliaj aferoj enestas, kiujn perdis aliuloj.

— Vi mensogas, — diris Vermlango. — Tiun ĉi glavon transdonis al mia prizorgo via mastro.

— Kaj nun li repostulas ĝin de vi, — diris Teodeno. — Ĉu tio malplaĉas al vi?

— Certe ne, mastro, — diris Vermlango. — Mi zorgas pri vi kaj la viaj laŭ mia kapablo. Sed ne lacigu vin, nek trostreĉu vian forton. Permesu al aliaj pritrakti tiujn ĉi ĝenajn gastojn. Via manĝaĵo estas surtabligota. Ĉu vi ne volas iri tien?

— Mi volas, — diris Teodeno. — Kaj manĝaĵo por miaj gastoj estu surtabligota apud mi. La armeo rajdos hodiaŭ. Elsendu la heroldojn! Ili kunvoku ĉiujn, kiuj loĝas ĉirkaŭe! Ĉiuj viroj kaj fortaj junuloj kapablaj porti armilojn, ĉiuj ĉevalposedantoj estu pretaj sursele ĉe la pordo antaŭ la dua horo post tagmezo!

— Kara mastro! — kriis Vermlango. — Ĝuste tion mi antaŭtimis. Tiu sorĉisto envultis vin. Ĉu neniu postrestos por defendi la Oran Palacon de viaj prapatroj kaj ĉiujn viajn trezorojn? Neniu por gardi la Mastron de Markio?

— Se tio estas envulto, — diris Teodeno, — ĝi ŝajnas al mi pli sana ol via flustrado. Via medicina arto postnelonge marŝigus min kvarpiede kvazaŭ besto. Ne, eĉ unu ne postrestos, eĉ ne Grimo. Ankaŭ Grimo rajdos. Iru! Vi ankoraŭ disponas tempon por senrustigi vian glavon.

— Kompatu min, mastro! — plorplendis Vermlango, peteme kuŝante sur la tero. — Kompatu tiun, kiu triviĝis servante vin. Ne sendu min for de via flanko! Almenaŭ mi apogos vin, kiam foriros ĉiuj aliaj. Ne forsendu vian fidelan Grimon!

— Vi havas mian kompaton, — diris Teodeno. — Kaj mi ne forsendas vin de mia flanko. Mi mem iros militi kun miaj viroj. Mi ordonas, ke vi akompanu min kaj pruvu vian fidindecon.

Vermlango rigardis po unu la vizaĝojn. En liaj okuloj vidiĝis mieno de persekutata besto serĉanta breĉon en ringo de malamikoj. Li lekis siajn lipojn per longa pala lango.

— Tian decidon oni eble atendus de reĝo el la domo de Eorlo, malgraŭ lia maljuneco, — li diris. — Sed tiuj, kiuj sincere amas lin, volus malŝarĝi liajn velkajn jarojn. Tamen mi konstatas, ke tro malfrue mi venis. Aliaj, kiujn la morto de mia mastro eble malpli dolorigus, jam persvadis lin. Sed mi ne povas malfari ties faron, aŭskultu min almenaŭ ĉi-rilate, mastro! Iu konanta vian menson kaj honoranta viajn ordonojn devus resti en Edoraso. Nomu fidindan kuratoron. Permesu, ke via konsilisto Grimo prizorgu ĉiujn aferojn ĝis via reveno; kaj mi preĝas, ke tion ni vidu, kvankam neniu saĝulo taksos ĝin probabla.

Eomero ridis:

— Kaj se tiu pledo ne liberigos vin de la milito, plej nobla Vermlango, — li diris, — kiu posteno malpli honora estus akceptebla de vi? Ĉu porti sakon da farano supren en la montaron, se iu konfidus tion al vi?

— Ne, Eomero, vi ne plene komprenas la menson de mastro Vermlango, — diris Gandalfo, direktante sur lin sian pikan rigardon. — Li estas aŭdaca kaj ruza. Ankaŭ nun li ludas danĝeran ludon kaj gajnas poentojn. Horojn de mia valora tempo li jam malŝparis. Suben, serpento! — li subite diris per terura voĉo. — Suben sur la ventron! Kiom da tempo pasis, post kiam Sarumano vin aĉetis? Kio estis la prezo promesita? Kiam ĉiuj viroj estus mortaj, vi estus elektonta vian porcion de la trezoro kaj ricevonta la virinon, kiun vi deziras, ĉu? Tro longe vi rigardis ŝin el sub la palpebroj kaj hantis ŝiajn paŝojn.

Eomero kroĉis sian glavon.

— Tion mi jam sciis, — li murmuris. — Pro tio mi pli frue mortigus lin, malatentante la leĝon de la halo. Sed ekzistas aliaj kialoj. — Li paŝis antaŭen, sed Gandalfo haltigis lin mansigne.

— Eovina estas jam sufiĉe sekura, — li diris. — Sed vi, Vermlango, faris vian eblon por via vera mastro. Almenaŭ iom da kompenso vi meritas. Tamen Sarumano emas preteratenti siajn interkonsentojn. Mi konsilas, ke vi iru rapide kaj memorigu lin antaŭ ol li forgesos vian fidelan servon.

— Vi mensogas, — diris Vermlango.

— Tiu vorto aŭdiĝas tro ofte kaj tro facile ĉe viaj lipoj, — diris Gandalfo. — Mi ne mensogas. Vidu, Teodeno, jen estas serpento! Sendanĝere vi ne povos kunpreni ĝin, nek vi povos lasi ĝin malantaŭe. Mortigi ĝin estus juste. Sed ĝi ne estis ĉiam tia, kia ĝi nun estas. Iam ĝi estis homo kaj servis vin siamaniere. Donu al li ĉevalon kaj li iru tuj, kien ajn li elektos. Laŭ lia elekto vi juĝos lin.

— Ĉu vi aŭdas tion, Vermlango? — diris Teodeno. — Jen via elekto: rajdi kun mi al la milito, kaj ni vidu en batalo, ĉu vi estas lojala; aŭ iri tuj kien ajn vi deziras. Sed poste, se iam ni rerenkontiĝos, mi ne estos kompatema.

Malrapide Vermlango stariĝis. Li rigardis ilin per siaj duonfermitaj okuloj. Laste li trarigardis la vizaĝon de Teodeno kaj malfermis sian buŝon kvazaŭ parolonte. Sed subite li rektigis sin. Liaj manoj moviĝis. Liaj okuloj ekflagris. En ili estis tia malico, ke homoj forpaŝis de li. Li nudigis siajn dentojn; poste kun sibla spiro li kraĉis antaŭ la piedojn de la reĝo kaj, saltinte flanken, li fuĝis malsupren laŭ la ŝtuparo.

— Sekvu lin! — diris Teodeno. — Atentu, ke li al neniu malutilu, sed nek vundu, nek malhelpu lin. Donu al li ĉevalon, se li deziros.

— Kaj se iu konsentos porti lin, — diris Eomero.

Unu el la gardistoj kuris suben laŭ la ŝtuparo. Alia iris al la puto funde de la teraso kaj plenigis per akvo sian kaskon. Per ĝi li purigis la ŝtonojn, kiujn Vermlango fimakulis.

— Nu, miaj gastoj, venu! — diris Teodeno. — Venu akcepti tiun refreŝigaĵon, kiun permesas la neceso rapidi.

Ili reiris en la domegon. Jam ili aŭdis sube en la urbo kriadon de la heroldoj kaj blovadon de militaj kornoj. Ĉar la reĝo estis elrajdonta tiel baldaŭ, kiel povis armiĝi kaj kunveni la viroj de la urbo kaj proksimaj loĝantoj.

Ĉe la reĝa tablo sidis Eomero kaj la kvar gastoj, kaj ankaŭ tie servis la reĝon la damo Eovina. Ili manĝis kaj trinkis rapide. La aliaj silentis, dum Teodeno pridemandis Gandalfon pri Sarumano.

— Kiu povas diveni, kiam komenciĝis liaj perfidoj? — diris Gandalfo. — Li ne ĉiam estis malbonema. Mi ne dubas, ke iam li estis amiko de Rohano; kaj eĉ kiam lia koro pli malardiĝis, li trovis vin ankoraŭ utila. Sed jam delonge li komplotis por ruinigi vin, portante maskon de amikeco, ĝis li estos preta. Dum tiuj jaroj la tasko de Vermlango facilis, kaj ĉio, kion vi faris, estis senprokraste konata en Isengardo; ĉar via lando estis malfermita kaj fremduloj venis-iris. Kaj ĉiam la flustrado de Vermlango estis en viaj oreloj venenante viajn pensojn, fridigante vian koron, malfortigante viajn

membrojn, dum aliaj spektis kaj povis fari nenion, ĉar via volo estis sub lia kuratoreco.

» Sed kiam mi eskapis kaj avertis vin, tiam ŝiriĝis la masko antaŭ tiuj, kiuj kapablis vidi. Post tio Vermlango ludis danĝere, ĉiam klopodante prokrastigi vin, por malhelpi amasigon de via plena potenco. Li estis ruza: malakrigante la homan singardemon, aŭ prilaborante la homajn timojn, laŭ postuloj de la okazaĵo. Ĉu vi memoras, kiel avide li urĝis, ke neniu estu sendota por sencela ĉasado norden, ĉar la tuja danĝero estis en la okcidento? Li persvadis vin malpermesi al Eomero persekuti la kaperantajn orkojn. Se Eomero ne malobeus la voĉon de Vermlango parolantan per via buŝo, tiuj orkoj jam atingus Isengardon, alportinte grandan valoraĵon. Efektive, ne tiun valoraĵon, kiun Sarumano deziras antaŭ ĉio, sed almenaŭ du anojn de mia kunularo, partoprenantojn en sekreta espero pri kiu eĉ al vi, mastro, mi ne povas ankoraŭ paroli malkaŝe. Ĉu vi kuraĝas pensi pri tio, kion ili eble nun suferus, aŭ pri kio Sarumano eble nun lernus por detrui nin?

— Mi ŝuldas multon al Eomero, — diris Teodeno. — Fidela koro povas havi impulsan langon.

— Diru ankaŭ, — diris Gandalfo, — ke laŭ kurbaj okuloj la vero povas vidigi vizaĝon torditan.

— Efektive miaj okuloj estis preskaŭ blindaj, — diris Teodeno. — Pleje mi ŝuldas al vi, mia gasto. Denove vi venis ĝustatempe. Mi volas doni al vi donacon antaŭ ol ni iros, laŭ via propra elekto. Necesas nur nomi ion ajn, kio estas mia. Mi rezervas nur mian glavon.

— Ĉu mi venis ĝustatempe aŭ ne, estas ankoraŭ konstatota, — diris Gandalfo. — Sed rilate vian donacon, mastro, mi elektos tiun, kiu konvenas al mia bezono: rapida kaj fidinda. Donu al mi Ombrofakson! Antaŭe ĝi estis nur pruntedonita, se tion oni rajtas nomi pruntedono. Sed nun mi rajdos ĝin en grandan danĝeron, direktante arĝenton kontraŭ nigron: mi ne volus riski ion, kio ne estus mia. Kaj jam ekzistas ama ligo inter ni.

— Vi elektas bone, — diris Teodeno, — kaj mi donacas ĝin nun kun plezuro. Tamen ĝi estas granda donaco. Neniu ekzistas simila al Ombrofakso. En ĝi revenis unu el la potencaj rajdbestoj de la pratempo. Neniu tia revenos estonte. Kaj al vi, miaj ceteraj gastoj, mi proponos tiajn aĵojn, kiaj troveblas en mia armilejo. Glavojn vi ne bezonas, sed troviĝas kaskoj kaj maŝkirasoj lerte kreitaj, donacoj al miaj prapatroj el Gondoro. Elektu inter ili antaŭ ol ni iros, kaj ili servu vin bone!

Nun venis viroj portante militvestaĵojn el la reĝa provizo, kaj ili vestis Aragornon kaj Legolason per brilaj maŝkirasoj. Ankaŭ kaskojn ili elektis kaj rondajn ŝildojn: iliaj bosoj estis kovritaj de oro kaj geminkrustitaj, verdaj, ruĝaj kaj blankaj. Gandalfo prenis neniun armaĵon; kaj Gimlio ne bezonis

maŝkirason eĉ se estus trovebla unu konvena al lia staturo, ĉar inter la provizoj de Edoraso troveblis neniu kiraso farita pli bone ol lia mallonga brustarmaĵo, forĝita sub la Monto en la Nordo. Sed li elektis ĉapon el fero kaj ledo, kiu bone alĝustiĝis al lia ronda kapo; kaj ankaŭ malgrandan ŝildon li prenis. Ĝi surhavis la kurantan ĉevalon, blankan sur verdo, kiu estis la emblemo de la domo de Eorlo.

— Ĝi gardu vin bone! — diris Teodeno. — Ĝi estas farita por mi en la tempo de Tengelo, dum mi estis ankoraŭ knabo.

Gimlio riverencis.

— Mi fieras, Mastro de Rohano, porti vian insignon, — li diris. — Efektive, mi preferus porti ĉevalon ol esti ĉevale portata. Mi pli ŝatas miajn piedojn. Sed eble mi alvenos ĝustatempe tien, kie mi povos stari kaj batali.

— Povos esti tiel, — diris Teodeno.

Nun la reĝo stariĝis, kaj tuj Eovina venis antaŭen portante vinon.

— *Ferthu Théoden Hál*! — ŝi diris. — Ricevu nun tiun ĉi pokalon kaj trinku en feliĉa horo. Sanon al vi iranta kaj venonta!

Teodeno trinkis el la pokalo kaj poste ŝi proponis ĝin al la gastoj. Starante antaŭ Aragorno ŝi subite paŭzis kaj rigardis lin, kaj ŝiaj okuloj brilis. Li subenrigardis al ŝia bela vizaĝo kaj ridetis; sed kiam li prenis la pokalon, lia mano tuŝis la ŝian, kaj li sciis, ke ŝi tremetas pro la tuŝo.

— Saluton, Aragorno, filo de Aratorno! — ŝi diris.

— Saluton, Damo de Rohano! — li respondis, sed lia vizaĝo estis jam zorgoplena kaj li ne ridetis.

Kiam ĉiuj estis trinkintaj, la reĝo trairis la halon ĝis la pordo. Tie la gardistoj atendis lin kaj staris heroldoj, kaj ĉiuj princoj kaj ĉefoj estis kunvenintaj, kiuj restis en Edoraso aŭ loĝis proksime.

— Vidu! Mi eliras kaj ŝajnas probable, ke ĝi estos mia lasta elrajdo, — diris Teodeno. — Infanon mi ne havas. Teodredo, mia filo, estas mortigita. Mi nomas Eomeron, filon de mia fratino, mia heredonto. Se neniu el ambaŭ revenos, tiam elektu novan reĝon laŭplaĉe. Sed al iu mi nun devas konfidi mian popolon postlasotan, por regi ĝin sur mia loko. Kiu el vi konsentos resti?

Neniu viro parolis.

— Ĉu neniun vi volas nomi? Al kiu fidas mia popolo?

— Al la domo de Eorlo, — respondis Hamo.

— Sed Eomeron mi ne povas malhavi, kaj li ankaŭ ne konsentos resti, — diris la reĝo. — Kaj li estas la lasta el tiu domo.

— Eomeron mi ne diris, — respondis Hamo. — Kaj li ne estas la lasta. Ekzistas Eovina, filino de Eomundo, lia fratino. Ŝi estas sentima kaj bravkora. Ĉiuj amas ŝin. Ŝi agu kiel mastro de la eorlidoj, dum ni estos for.

— Estu tiel, — diris Teodeno. — La heroldoj anoncu al la popolo, ke ilin gvidos damo Eovina!

Poste la reĝo sidiĝis sur seĝon antaŭ la pordo, kaj Eovina genuis antaŭ li kaj ricevis de li glavon kaj belforman brustarmaĵon.

— Adiaŭ, fratina filino! — li diris. — Malluma estas la horo, tamen eble ni revenos al la Ora Halo. Sed en Dunharo la popolo povos longe defendi sin, kaj se la batalo iros mise tien venos ĉiuj eskapintoj.

— Ne parolu tiel! — ŝi respondis. — Jaron mi suferos dum ĉiu tago, kiu pasos antaŭ via reveno. — Sed dumparole ŝiaj okuloj direktiĝis al Aragorno staranta proksime.

— La reĝo revenos, — li diris. — Ne timu! Ne okcidente, sed oriente atendas nin nia sorto.

La reĝo descendis laŭ la ŝtuparo kun Gandalfo apude. La aliaj sekvis. Aragorno rerigardis, kiam ili proksimiĝis al la pordo. Eovina staris sola antaŭ la pordo de la domo supre de la ŝtupoj; la glavo estis metita vertikale antaŭ ŝi kaj ŝiaj manoj estis metitaj al la tenilo. Ŝi estis jam kirase vestita kaj brilis kiel arĝento en la sunlumo.

Gimlio marŝis apud Legolaso kun hakilo sur sia ŝultro.

— Nu, finfine ni ekiras! — li diris. — Homoj bezonas multajn vortojn antaŭ la agoj. Mia hakilo senpaciencas en miaj manoj. Tamen mi ne dubas, ke ĉi tiuj rohananoj estas durmanaj, kiam ili ekagas. Malgraŭ tio, jen ne estas tia milito, kia konvenas al mi. Kiel mi atingos la batalon? Mi volus marŝi kaj ne skuiĝi kiel sako antaŭ la selantaŭaĵo de Gandalfo.

— Sidloko pli sendanĝera ol multaj, mi supozas, — diris Legolaso. — Sed sendube Gandalfo volonte submetos vin surpieden, kiam komenciĝos la batoj; aŭ Ombrofakso mem. Hakilo ne estas taŭga armilo por rajdanto.

— Kaj gnomo ne estas rajdisto. Ork-nukojn mi volas haki, ne razi la kapojn de homoj, — diris Gimlio, frapetante la tenilon de sia hakilo.

Ĉe la pordo ili renkontis grandan viramason, junajn kaj maljunajn, ĉiujn prete surselajn. Pli ol milo tie kunvenis. Iliaj lancoj estis kiel kreska arbareto. Laŭte kaj ĝoje ili kriis, kiam Teodeno venis. Iuj tenis preta la reĝan ĉevalon Neĝkolaĵo, kaj aliaj tenis la ĉevalojn de Aragorno kaj Legolaso. Gimlio staris ĝenate, malridante, sed Eomero venis al li kondukante sian ĉevalon.

— Saluton, Gimlio, filo de Gloino! — li kriis. — Mi ankpraŭ ne

disponis tempon por lerni ĝentilajn parolojn sub via draŝo, kiel vi promesis. Sed ĉu ni ne flankenmetu nian kverelon? Mi almenaŭ ne parolos denove mise pri la Damo de la Arbaro.

— Mi forgesos mian koleron por kelka tempo, Eomero, filo de Eomundo, — diris Gimlio, — sed se iam vi hazarde vidos la Damon Galadriela propraokule, tiam vi devos agnoski ŝin la plej bela el la virinoj, aŭ nia amikeco ĉesos.

— Tiel estu! — diris Eomero. — Sed ĝis tiam pardonu min, kaj kiel signo de pardono rajdu kun mi, mi petas. Gandalfo estos ĉe la kapo kun la Mastro de Rohano; sed Fajrpiedo, mia ĉevalo, portos nin ambaŭ, se vi konsentas.

— Mi dankas vin tre varme, — diris Gimlio ege kontenta. — Mi ĝoje kuniros vin, se Legolaso, mia kamarado, rajtos rajdi apud ni.

— Estos tiel, — diris Eomero. — Legolaso maldekstre kaj Aragorno dekstre, kaj neniu aŭdacos kontraŭstari nin!

— Kie estas Ombrofakso? — demandis Gandalfo.

— Kuranta sovaĝe sur la herbo, — ili respondis. — Ĝi permesas al neniu homo tuŝi sin. Jen ĝi iras, fore apud la vadejo, kiel ombro inter la salikoj.

Gandalfo fajfis kaj vokis laŭte la nomon de l' ĉevalo, kaj tiu en malproksimo flirtigis la kapon kaj henis, kaj, sin turninte, sage rapidis al la homamaso.

— Se la spiro de la okcidenta vento plenigus korpon videblan, ĝuste tia ĝi aspektus, — diris Eomero dum la ĉevalego alkuris ĝis ĝi ekstaris antaŭ la sorĉisto.

— La donaco ŝajnas jam donacita, — diris Teodeno. — Sed aŭskultu ĉiuj! Jen ĉi tie mi nomas mian gaston Gandalfon Grizmantelo, la plej saĝan el konsilistoj, la plej bonvenan el vagantoj, princo de Markio, ĉefo de la eorlidoj, dum vivas mia parencaro; kaj mi donacas al li Ombrofakson, nobelon inter ĉevaloj!

— Mi dankas vin, reĝo Teodeno, — diris Gandalfo. Poste li subite ŝovis malantaŭen sian grizan mantelon kaj flankenĵetis sian ĉapelon kaj saltis surseliĝe. Li vestis nek kaskon, nek maŝkirason. Liaj neĝecaj haroj flirtis libere en la vento; lia blanka robo brilis blindige en la sunlumo.

— Vidu la Blankan Rajdanton! — kriis Aragorno, kaj ĉiuj ripetis la vortojn.

— Nia Reĝo kaj la Blanka Rajdanto! — ili kriis. — Ek, eorlidoj! La kornoj sonoris. La ĉevaloj baŭmis kaj henis. Lancoj klakegis kontraŭ ŝildoj. Poste la reĝo levis sian manon, kaj kun impeto, kiel la subita ekblovo de forta vento, la lasta armeo de Rohano ekrajdis tondre al la okcidento.

Malproksiman sur la ebenaĵo vidis Eovina la ekbrilon de iliaj lancoj, dum ŝi staris senmove, sola antaŭ la pordoj de la silenta domo.

7

Profundaĵo de Helmo

La suno jam turniĝis okcidenten, kiam ili elrajdis el Edoraso, kaj ĝia lumo trafis iliajn okulojn, volvante ĉiujn sinsekvajn kampojn de Rohano en ora nebuleto. Ekzistis plandumita vojo nord-okcidenten laŭ la antaŭmontetoj de la Blankaj Montoj, kaj tiun ili laŭiris supren-suben en verda tereno, transirante etajn rapidajn rojojn per multaj travadejoj. Fore antaŭe kaj dekstre baŭmis la Nebulecaj Montoj; ĉiam pli malhelaj kaj pli altaj ili iĝis kun trapaso de la mejloj. La suno malrapide sinkis antaŭ ili. Vespero postsekvis.

La armeo plu rajdis. Neceso pelis ilin. Timante alveni tro malfrue, ili rajdis laŭpove rapide, malofte paŭzante. Rapidaj kaj eltenemaj estis la rajdbestoj de Rohano, sed restis multaj leŭgoj irendaj. Kvardek leŭgoj kaj pli estis la distanco, laŭ flugvojo de birdo, de Edoraso ĝis la Travadejoj de Iseno, kie ili esperis trovi la reĝajn soldatojn, kiuj baris la hordojn de Sarumano.

Nokto envolvis ilin. Fine ili haltis por bivaki. Ili jam rajdis kvin horojn kaj estis fore sur la okcidenta ebenaĵo, tamen pli ol la duono de la vojaĝo ankoraŭ kuŝis antaŭ ili. En granda cirklo sub la stelplena ĉielo kaj kreskanta luno ili starigis sian bivakon. Ili bruligis neniujn fajrojn, ĉar ili malcertis pri la okazaĵoj; sed ili postenigis ringon da surĉevalaj sentineloj, kaj skoltoj rajdis fore antaŭen, pasante kvazaŭ ombroj en la faldaĵoj de la tero. Pasis la malrapida nokto sen informoj aŭ alarmoj. Je l' aŭroro sonoris la kornoj, kaj en malpli ol unu horo ili denove ekvojaĝis.

Ankoraŭ ne estis nuboj superkape, sed pezo estis en la aero; estis varmege pli ol kutime tiusezone. La supreniranta suno estis vualita, kaj malantaŭ ĝi, sekvante ĝin lante supren sur la ĉielo, vidiĝis kreskanta mallumo mornanta ĉirkaŭ la suboj de la Nebulecaj Montoj, ombro kiu subenrampis malrapide el la Sorĉista Valo.

Gandalfo retrovenis ĝis kie Legolaso rajdis apud Eomero.

— Vi havas akran vidpovon de via brava parencaro, Legolaso, — li diris, — kaj vi kapablas distingi paseron dis de fringo en leŭga malproksimo. Diru al mi, ĉu vi vidas ion tie fore en la direkto de Isengardo?

— Multaj leŭgoj kuŝas intere, — diris Legolaso, tien rigardante kaj ombrumante la okulojn per sia longa mano. — Mi vidas mallumon. En ĝi moviĝas figuroj, grandaj figuroj tre malproksime sur la riverbordo; sed kio

ili estas, tion mi ne povas rekoni. Nek nebuleto nek nuboj venkas miajn okulojn: troviĝas ia vualanta ombro kiun iu potenco metas sur la landon, kaj ĝi progresas malrapide malfonten. Estas kvazaŭ krepusko sub senfinaj arboj fluus malsupren el la montoj.

— Kaj malantaŭ ni venas ŝtormo mem el Mordoro, — diris Gandalfo. — La nokto estos nigrega.

Dum ilia dua rajdotago progresis, la pezo en la aero pliiĝis. Posttagmeze la malhelaj nuboj komencis ĝisatingi ilin: sombra baldakeno kun grandaj ondantaj randoj makulitaj je blindiga lumo. La suno malsupreniris, sangruĝa en fuma nebuleto. La lancojn de la rajdistoj pintigis fajro, dum la lastaj lumstrioj ĉendis la apikajn fruntojn de la montovertoj de Trihirno: jam tre proksimaj ili staris sur la plej norda brako de la Blankaj Montoj, tri akrangulaj kornoj rigardantaj al la sunsubiro. Per la lasta ardo ruĝa viroj en la antaŭo vidis nigran punkteton, rajdiston rajdantan al ili. Ili haltis atendante lin.

Li venis, viro lacega kun fendita kasko kaj fendita ŝildo. Malrapide li elseliĝis kaj staris tie iom da tempo anhelante. Finfine li parolis.

— Ĉu ĉeestas Eomero? — li demandis. — Finfine vi venas, sed tro malfrue, kaj kun tro malgranda potenco. La aferoj iris malbone, de kiam falis Teodredo. Hieraŭ ni estis retropuŝitaj trans Isenon kun grandaj perdoj; multaj pereis dum la transiro. Poste dumnokte novaj fortoj venis trans la riveron kontraŭ nian bivakon. La tuta Isengardo certe estas malplenigita; kaj Sarumano armis la sovaĝajn montaranojn kaj paŝtistojn el Dunlando trans la riveroj, kaj ankaŭ tiujn li malligis kontraŭ nin. Ni estas venkitaj. La ŝildmuro estis breĉita. Erkenbrando el Ŭestfaldo forprenis la virojn, kiujn li povis kunigi, al sia fortikaĵo en la Profundaĵo de Helmo. La ceteraj estas dispelitaj. Kie estas Eomero? Sciigu lin, ke antaŭe estas nenia espero. Li devus reiri al Edoraso antaŭ ol la lupoj de Isengardo alvenos tien.

Teodeno estis sidinta silente, kaŝita al la viro malantaŭ siaj gardistoj; nun li urĝis antaŭen sian ĉevalon.

— Venu, staru antaŭ min, Keorlo! — li diris. — Mi estas ĉi tie. La lasta armeo de la eorlidoj elrajdis. Ĝi ne reiros sen batalo.

La vizaĝo de l' viro heliĝis pro ĝojo kaj miro. Li rektigis sin. Poste li genuis, proponante sian noĉitan glavon al la reĝo.

— Ordonu min, mastro! — li kriis. — Kaj pardonu min! Mi supozis...

— Vi supozis, ke mi restis en Meduseldo kurbigite kvazaŭ maljuna arbo sub vintra neĝo. Tiel estis, kiam vi elrajdis al milito. Sed okcidenta vento skuis la branĉojn, — diris Teodeno. — Donu al tiu ĉi viro freŝan ĉevalon! Ni rajdu por helpi Erkenbrandon!

Dum Teodeno parolis, Gandalfo rajdis iomete antaŭen, kaj tiel li sidis

sola, rigardante norden al Isengardo kaj okcidenten al la subiranta suno. Nun li revenis.

— Rajdu, Teodeno! — li diris. — Rajdu al la Profundaĵo de Helmo! Ne iru al la Travadejoj de Iseno, kaj ne prokrastu sur la ebenaĵo! Mi devas lasi vin provizore. Ombrofakso devas nun porti min pro hasta komisio. — Turninte sin al Aragorno, Eomero kaj la viroj de la reĝa domanaro, li kriis: — Gardu bone la Mastron de Markio ĝis mi revenos. Atendu min ĉe la Pordo de Helmo! Adiaŭ!

Li diris vorton al Ombrofakso, kaj kiel sago el pafarko la granda ĉevalo forsaltis. Ĝuste dum oni rigardis li estis for: flagro de arĝento en la sunsubiro, vento tra la herbaro, ombro kiu foriris kaj pasis el la vidkapablo. Neĝkolaĵo snufis kaj baŭmis, avida por sekvi; sed nur rapide fluganta birdo povus ĝin ĝisatingi.

— Kion signifas tio? — diris unu el la gardistoj al Hamo.

— Ke Gandalfo Grizmantelo devas hasti, — respondis Hamo. — Ĉiam li iras-venas neatendite.

— Vermlango, se tiu ĉeestus, ne trovus malfacile klarigi, — diris la alia.

— Sufiĉe vere, — diris Hamo, — sed miaflanke mi atendos ĝis mi vidos denove Gandalfon.

— Eble vi longe atendos, — diris la alia.

La armeo nun forturnis sin de la vojo al la Travadejoj de Iseno kaj direktis siajn paŝojn al la sudo. Noktiĝis, kaj daŭre ili rajdis. La montetoj proksimiĝis, sed la altaj pintoj de Trihirno jam malklaris kontraŭ la malheliĝanta ĉielo. Ankoraŭ plurajn mejlojn for, aliflanke de la Ŭestfalda Valo, kuŝis verda kavaĵo, granda golfo en la montaro, el kiu malfermiĝis inter la montetoj interkrutejo. La tiulandaj homoj nomis ĝin la Profundaĵo de Helmo, laŭ heroo de l' antikvaj militoj kiu starigis tie sian rifuĝejon. Ĉiam pli apike kaj pli mallarĝe ĝi serpentumis enen el la nordo sub la ombro de Trihirno, ĝis la korvhantataj klifoj leviĝis kvazaŭ potencaj turegoj ambaŭflanke, forbarante la lumon.

Ĉe la Pordo de Helmo, antaŭ la enirejo de la Profundaĵo, estis roka kalkano elŝovita de la norda klifo. Tie sur la supraĵo staris altaj muroj da antikva ŝtono, kaj ene de ili estis altega turo. La homoj diris, ke en la prapasintaj tagoj de la Gondora gloro la transmaraj reĝoj konstruis tie la fortikaĵon per manoj de gigantoj. Kornburgo ĝi nomiĝis, ĉar korno sonorigita sur la turo eĥis en la profundaĵo malantaŭe, kvazaŭ armeoj longe forgesitaj militiras el kavernoj sub la montetoj. Ankaŭ muron konstruis la prahomoj de Kornburgo ĝis la suda klifo, barantan la enirejon al la interkrutejo. Sub ĝi per larĝa subirejo elfluis la Profundaĵa Rojo. Ĉirkaŭ la subaĵojn de la Kornroko ĝi serpentumis kaj poste fluis en ravineto tra la

mezo de larĝa verda ebenaĵo malabrupte deklivanta suben de la Pordo de Helmo ĝis la ŝtonmuro de Helmo. De tie ĝi falis en la Profundan Kavaĵon kaj el tie al la Ŭestfalda Valo. Tie en Kornburgo ĉe la Pordo de Helmo nun loĝis Erkenbrando — mastro de Ŭestfaldo ĉe la limo de Markio. Dum la tagojn malheligis militminaco li, estante saĝa, riparis la muron kaj fortigis la fortikaĵon.

La rajdantoj estis ankoraŭ en la malalta valo antaŭ la enirejo de la Kavaĵo, kiam aŭdiĝis krioj kaj kornsonoro de iliaj skoltoj, kiuj estis antaŭe. El la mallumo fajfis sagoj. Rapide skolto retrorajdis kaj raportis, ke lupaj rajdantoj estis en la valo, kaj ke hordo da orkoj kaj sovaĝuloj rapidadas suden el la Travadejoj de Iseno kaj ŝajnas celi al la Profundaĵo de Helmo.

— Ni trovis multajn niajn homojn kuŝantaj mortigitaj dum ili fuĝis tien, — diris la skolto. — Kaj ni renkontis dispelitajn kompaniojn irantaj tien-reen senestre. Kio okazis al Erkenbrando, neniu ŝajne scias. Estas tre verŝajne, ke li estos ĝisatingita antaŭ ol li povos alveni la Pordon de Helmo, se li ankoraŭ ne pereis.

— Ĉu vidiĝis io rilate al Gandalfo? — demandis Teodeno.

— Jes, mastro. Multaj vidis maljunulon blankvestitan sur ĉevalo pasantan tien-reen tra la ebenaĵo kvazaŭ vento tra la herbaro. Iuj supozis lin Sarumano. Oni diras, ke antaŭ la noktiĝo li foriris direkte al Isengardo. Aliaj diras, ke ankaŭ Vermlango estis pli frue vidita irante norden kun bando da orkoj.

— Okazos malbone al Vermlango, se Gandalfo trovos lin, — diris Teodeno. — Tamen mankas al mi nun ambaŭ miaj konsilistoj, la malnova kaj la nova. Sed en tiu ĉi krizo ni ne povas pli bone elekti ol pluiri, kiel diris Gandalfo, ĝis la Pordo de Helmo, ĉu aŭ ne Erkenbrando estas tie. Ĉu estas konate, kiom granda estas la hordo venanta el la nordo?

— Ĝi estas tre granda, — diris la skolto. — Fuĝanto nombras ĉiun malamikon duoble, tamen mi alparolis virojn bravkorajn, kaj mi ne dubas, ke la ĉefa fortaĵo de la malamikoj estas multoble pli granda ol ĉiuj, kiujn ni havas ĉi tie.

— Do ni agu rapide, — diris Eomero. — Ni trabreĉu tiujn malamikojn, kiuj jam troviĝas inter ni kaj la fortikaĵo. Ekzistas kavernoj en la Profundaĵo de Helmo, kie centoj povas kaŝi sin; kaj sekretaj pasejoj kondukas el tie sur la montetojn.

— Ne fidu al sekretaj pasejoj, — diris la reĝo. — Sarumano jam delonge spionesploris tiun ĉi landon. Tamen tiuloke nia defendo povos daŭri longe. Ni iru!

Aragorno kaj Legolaso nun iris kun Eomero en la antaŭo. Plu tra la malluma nokto ili rajdis, ĉiam pli malrapide, dum la mallumo profundiĝis

kaj ilia vojo supreniris suden, pli kaj pli alten en la malklarajn faldaĵojn ĉirkaŭ la suboj de la montoj. Jen kaj jen ili trafis vagantajn bandojn da orkoj; sed tiuj fuĝis antaŭ ol la rajdistoj povis kapti aŭ mortigi ilin.

— Ne pasos tre longe, mi timas, — diris Eomero, — ĝis la alveno de la reĝa armeo estos konata al la estro de niaj malamikoj, ĉu Sarumano aŭ kiu ajn komandanto sendita de li.

La rumoro de milito kreskis malantaŭ ili. Nun ili povis aŭdi ŝvebantan tra la mallumo sonon de raŭka kantado. Ili plugrimpis foren en la Profundan Kavaĵon kiam ili rerigardis. Tiam ili vidis torĉojn, sennombrajn punktojn de fajra lumo sur la nigraj kampoj malantaŭe, disigitajn kvazaŭ ruĝaj floroj, aŭ serpentumantajn supren el la malaltejo laŭ longaj flagrantaj linioj. Ie-tie suprensaltis bruloj pli grandaj.

— Tio estas hordo granda kaj sekvas nin proksime, — diris Aragorno.

— Ili alportas fajron, — diris Teodeno, — kaj ili bruligas survoje fojnaĵojn, kabanojn kaj arbojn. Tiu ĉi valo estis fekunda kaj havis multajn domojn. Ve por mia popolo!

— Se nur la tago estus kaj ni povus rajdi kontraŭ ilin kiel ŝtormo el la montaro! — diris Aragorno. — Dolorigas min fuĝi antaŭ ili.

— Ne necesos fuĝi multe pluen, — diris Eomero. — Antaŭe ne malproksime jam kuŝas la ŝtonmuro de Helmo, antikva fosaĵo kaj remparo strekitaj trans la kavaĵon, kvaronmejlon sub la Pordo de Helmo. Tie ni povos turniĝi kaj proponi batalon.

— Ne, ni estas tro malmultaj por defendi la Ŝtonmuron, — diris Teodeno. — Ĝi longas unu mejlon aŭ pli, kaj la breĉo en ĝi estas larĝa.

— Ĉe la breĉo devos stari nia ariergardo, se ni estos premitaj, — diris Eomero.

Nek steloj nek luno estis, kiam la rajdantoj alvenis la breĉon en la ŝtonmuro, kie la rojo el supre elfluis kaj apud ĝi pado descendis de Kornburgo. La remparo baŭmis subite antaŭ ili, alta ombro post malluma puto. Kiam ili alrajdis, alvokis ilin sentinelo.

— La Mastro de Markio rajdas al la Pordo de Helmo, — Eomero respondis. — Mi, Eomero, filo de Eomundo, parolas.

— Jen feliĉa novaĵo pli ol niaj esperoj, — diris la sentinelo. — Rapidu! La malamiko proksime persekutas vin.

La armeo trairis la breĉon kaj haltis supre sur la dekliva herbaĵo. Ili nun sciiĝis ĝoje, ke Erkenbrando postlasis multajn virojn por defendi la Pordon de Helmo, kaj pli multaj poste eskapis tien.

— Eble ni havas milon kapablan batali surpiede, — diris Gamlingo, maljunulo, la estro de la ŝtonmuraj defendantoj. — Sed plimulto el ili, kiel mi, spertis tro multajn vintrojn aŭ tro malmultajn kiel la jena filo de mia

filo. Kia novaĵo pri Erkenbrando? Sciigo alvenis hieraŭ ke li retretas ĉi tien kun ĉiuj restantaj el la plej bonaj rajdistoj de Ŭestfaldo. Sed li ne venis.

— Mi timas, ke li jam ne venos, — diris Eomero. — Niaj skoltoj akiris neniom da informoj pri li, kaj la malamikoj plenigas la tutan valon malantaŭ ni.

— Mi volus ke li estu eskapinta, — diris Teodeno. — Li estas potenculo. En li revivis la braveco de Helmo la Martelmana. Sed ni ne povas atendi lin ĉi tie. Ni devos nun reloki nian tutan forton malantaŭ la murojn. Ĉu vi estas bone provizitaj? Ni kunportas malmulte da provizaĵo, ĉar ni elrajdis al aperta batalo, ne al sieĝo.

— Malantaŭ ni en la kavernoj de l' Profundaĵo estas tri kvaronoj el la popolo Ŭestfalda, maljunaj kaj junaj, infanoj kaj virinoj, — diris Gamlingo. — Sed ankaŭ granda kvanto da nutraĵo, kaj multaj bestoj kaj ties furaĝo, estas tie kunmetitaj.

— Estas bone, — diris Eomero. — Oni bruligas aŭ forrabas ĉion restintan en la valo.

— Se ili venos marĉandi pri niaj varoj ĉe la Pordo de Helmo, ili pagos altan prezon, — diris Gamlingo.

La reĝo kaj ties rajdistoj pluiris. Antaŭ la digvojo, kiu transiris la rojon, ili elseliĝis. En longa spaliro ili kondukis siajn ĉevalojn supren laŭ la taluso kaj eniris tra l' pordoj de Kornburgo. Tie oni bonvenigis ilin kun ĝojo kaj renoviĝinta espero; ĉar jam ĉeestis sufiĉaj viroj por postenigi kaj la burgon kaj la barilon.

Rapide Eomero starigis pretaj siajn virojn. La reĝo kaj ties domanaro estis en Kornburgo, kaj tie estis ankaŭ multaj Ŭestfaldaj viroj. Sed sur la Profundaĵa Muro kaj ties turo, kaj malantaŭ ĝi, Eomero starigis la pliparton de la batalontoj kiujn li disponis, ĉar tie la defendo ŝajnis pli dubinda, se la atako estus obstina kaj multnombra. La ĉevalojn oni kondukis foren tra la Profundaĵo kun tia gardo kia eblis.

La Profundaĵa Muro altis dudek futojn, kaj estis tiel dika ke kvar homoj povis marŝi flankon ĉe flanko sur ĝia supro, ŝirmitaj de parapeto trans kiun povis rigardi nur homoj tre altaj. Ie-tie estis fendaĵoj en la ŝtono tra kiuj povus pafi la homoj. Tiu ĉi remparo estis atingebla per ŝtuparo descendanta de pordo en la ekstera korto de Kornburgo; ankaŭ tri unuopaj ŝtuparoj kondukis supren sur la muron el la profundaĵo malantaŭe; sed antaŭe ĝi estis glata, kaj ĝiaj ŝtonegoj estis metitaj tiel lerte, ke ne troveblis piedapogo kie ili kuniĝis, kaj supre ili kliniĝis eksteren kiel klifo mar-fosita.

Gimlio staris apogite per la brustarmaĵo sur la muro. Legolaso sidis supre sur la parapeto, fingrumante sian pafarkon kaj rigardante en la sombron.

— Tio ĉi pli plaĉas al mi, — diris la gnomo, piedbatante la ŝtonojn. — Ĉiam mia koro soras kiam mi proksimiĝas al montoj. Ĉi tie estas bonkvalita roko. Tiu ĉi tereno havas ostojn fortikajn. Mi sentis ilin per miaj piedoj dum ni supreniris de la ŝtonmuro. Havigu al mi jaron kaj centon el mia parencaro kaj mi farus el tio ĉi lokon, kie armeoj rompiĝus kiel akvo.

— Tion mi ne dubas, — diris Legolaso. — Sed vi estas gnomo, kaj gnomoj estas stranguloj. Mi ne ŝatas tiun ĉi lokon, kaj mi ne ŝatos ĝin pli en la taga lumo. Sed vi konsolas min, Gimlio, kaj mi ĝojas ke vi staras apude kun viaj fortikaj kruroj kaj via dura hakilo. Mi volus ke estu pli el via parencaro inter ni. Sed eĉ pli mi donus por cent bonaj arkpafistoj el Mornarbaro. Ni bezonos ilin. La rohananoj havas bonajn arkpafistojn, sed ĉi tie estas tre malmultaj, tro malmultaj.

— Estas mallume por arkpafado, — diris Gimlio. — Efektive estas jam tempo dormi. Dormi! Mi tion bezonas, kiom mi neniam supozis gnomon dormema. Rajdado estas laciga tasko. Tamen mia hakilo senpaciencas en mia mano. Havigu al mi vicon da orkaj nukoj kaj spacon por svingi kaj mia tuta laciĝo forfalos de mi!

Tempo pasis lante. Fore en la valo ankoraŭ brulis disaj fajroj. La armeo de Isengardo nun pluiris silente. Iliaj torĉoj estis videblaj serpentumante multspalire supren laŭ la kavaĵo.

Subite de la Ŝtonmuro eksplodis krioj kaj kriĉoj kaj la ferocaj batalsloganoj de homoj. Flamantaj torĉoj aperis super la rando kaj rapide amasiĝis ĉe la breĉo. Poste ili disiris kaj malaperis. Homoj revenis galopante tra la kampo kaj supren laŭ la deklivo ĝis la pordo de Kornburgo. La ariero de l' ŭestfaldanoj estis enpelita.

— La malamiko ĉeestas! — ili kriis. — Ni pafis ĉiun sagon, kiun ni havis, kaj plenigis je orkoj la Fosaĵon. Sed tio ne longe haltigos ilin. Jam ili grimpas la remparon multloke, densaj kiel marŝantaj formikoj. Sed ni instruis al ili ne porti torĉojn.

Estis jam post la noktomezo. La ĉielo estis tute malluma kaj la senmovo de la peza aero antaŭsignis ŝtormon. Subite la nuboj estis bruligitaj per blindiga flagro. Forka fulmo frapis suben al la orientaj montetoj. Dum fiksrigarda momento la surmuraj gvatantoj vidis la tutan spacon inter si kaj la ŝtonmuro lumigita per blanka lumo: ĝi bolis kaj svarmis je nigraj figuroj, iuj stumpaj kaj larĝaj, iuj altaj kaj minacaj, kun altaj kaskoj kaj nigraj ŝildoj. Pliaj centoj kaj centoj verŝiĝis el trans la Ŝtonmuro kaj tra la breĉo. La malhela tajdo fluis al la muroj de klifo al klifo. Tondro ruliĝis en la valo. Pluvo plaŭdadis suben.

Sagoj densaj kiel la pluvoj venis fajfe trans la krenelaĵon kaj falis tinte kaj resalte sur la ŝtonojn. Iuj trafis sian celon. Komenciĝis atako kontraŭ la

Profundaĵon de Helmo, sed neniu sono aŭ defio aŭdiĝis interne; venis neniuj respondaj sagoj.

La atakantaj trupoj haltis, malhelpataj per la silenta minaco de rokoj kaj muro. Ĉiam denove fulmo traŝiris la mallumon. Poste la orkoj kriĉis, kirligante lancojn kaj glavojn kaj pafante amason da sagoj al iuj starantaj vidataj sur la krenelaĵo; kaj la viroj de Rohano mirigite elrigardis, kiel ŝajnis al ili, al granda kampo de malhela greno perturbita de milita tempesto, kaj ĉiu grenero ekbrilis je pintigita lumo.

Latunaj kornoj sonoris. La malamikoj ondis antaŭen, iuj kontraŭ la Profundaĵan Muron, aliaj al la digvojo kaj la deklivo kondukantaj al la Kornburga pordego. Tie kolektiĝis la plej enormaj orkoj kaj la sovaĝuloj de la Dunlandaj altaĵoj. Momente tiuj hezitis kaj poste antaŭeniris. La fulmo flagris, kaj videblis blazonite sur ĉiuj kaskoj kaj ŝildoj la terura mano de Isengardo. Ili alvenis la pinton de la rokoj; ili impetis al la pordo.

Tiam finfine venis respondo: ilin renkontis ŝtormo da sagoj kaj hajlo da ŝtonoj. Ili ŝanceliĝis, rompiĝis kaj retrofuĝis; kaj poste impetis denove, rompiĝis kaj reimpetis; kaj ĉiufoje, kiel flusanta maro, ili haltis ĉe loko pli alta. Denove sonoris trumpetoj, kaj alpremiĝo de muĝantaj dunlandanoj antaŭen saltis. Ili tenis siajn grandajn ŝildojn supre kiel tegmenton, dum en sia mezo ili portis du trunkojn de fortaj arboj. Malantaŭ ili amasiĝis orkaj pafistoj, sendantaj hajlon da ĵetlancoj kontraŭ la pafistoj sur la muroj. Ili atingis la pordegon. La arboj, svingataj de fortaj brakoj, bategis la lignaĵon kun ŝira bruego. Se iu viro falis premegita de ŝtono impetanta de supre, du aliaj saltis por anstataŭi lin. Ĉiam denove la grandaj ramoj svingiĝis kaj bategis.

Eomero kaj Aragorno staris kune sur la Profundaĵa Muro. Ili aŭdis la muĝadon de voĉoj kaj la batadon de la ramoj; kaj poste per subita flagro de lumo ili vidis la danĝeron al la pordego.

— Venu! — diris Aragorno. — Venas la horo kiam ni elingigu la glavojn kune!

Kurante kvazaŭ fajro, ili rapidis laŭlonge de la muro kaj supren laŭ la ŝtupoj kaj pasis en la eksteran korton sur la Roko. Kurante ili kunvenigis manplenon da bravaj glavbatalistoj. Troviĝis malgranda klappordo, kiu malfermiĝis en angulo de la burgomuro okcidente, kie la klifo etendiĝis renkonte. Ĉe tiu flanko ĉirkaŭiris mallarĝa pado al la granda pordo, inter la muro kaj la apika rando de la Roko. Eomero kaj Aragorno trasaltis la pordon kun siaj kunuloj proksime malantaŭe. La du glavoj fulme elingiĝis samtempe.

— Gutvineo! — kriis Eomero. — Gutvineo por Markio!

— Andurilo! — kriis Aragorno. — Andurilo por la Dunadanoj!

Deflanke ili impete ĵetis sin kontraŭ la sovaĝulojn. Andurilo leviĝis, descendis, ardante je blanka fajro. Krio ascendis el muro kaj turo:

— Andurilo! Andurilo ekmilitas. La Klingo Rompita brilas denove!

Konsternite la ramistoj lasis fali la arbojn kaj turniĝis por lukti; sed ilia ŝildmuro estis rompita kvazaŭ per fulmobato, kaj ili forbalaiĝis, dehakitaj aŭ ĵetitaj trans la Rokon en la ŝtonozan rivereton sube. La orkaj arkpafistoj pafis sencele kaj poste fuĝis.

Momente Eomero kaj Aragorno haltis antaŭ la pordego. La tondro murmuris jam malproksime. La fulmo ankoraŭ flagris, fore inter la montoj en la sudo. Akra vento denove bloviĝis el la nordo. La nuboj estis ŝiritaj kaj drivantaj, kaj steloj elpalpebrumis; kaj super la montetoj apud la Kavaĵo ŝvebis luno okcidentema, flave briletanta en la ŝtorm-postlasaĵo.

— Ne tro frue ni alvenis, — diris Aragorno, rigardante la pordegon. Ties grandaj ĉarniroj kaj feraj bariloj estis torditaj kaj kurbigitaj; multaj lignaĵoj estis fenditaj.

— Tamen ni ne povas resti ĉi tie ekster la muroj por defendi ilin, — diris Eomero. — Vidu! — li indikis la digvojon. Jam granda amaso de orkoj kaj homoj ekkuniĝis aliflanke de l' rivereto. Sagoj fajfis kaj resaltetis sur la ŝtonoj ĉirkaŭ ili. — Venu! Ni devas reiri kaj vidi, kion ni povos fari por amasigi ŝtonojn kaj trabojn trans la pordo interne. Venu tuj!

Ili turniĝis kaj kuris. Tiumomente ĉirkaŭ dek du orkoj, kiuj kuŝis senmove inter la mortigitoj, salte stariĝis kaj venis silente kaj rapide malantaŭe. Du ĵetis sin teren ĉe l' kalkanoj de Eomero, faligis lin kaj tuj surkuŝis lin. Sed eta malhela figuro rimarkita de neniu saltis el la ombroj kaj eligis raŭkan krion: "*Baruk Khazad! Khazad ai-menu*!" Svingiĝis hakilo kaj resvingiĝis. Du orkoj falis senkapigitaj. La ceteraj fuĝis.

Eomero barakte stariĝis, ĝuste kiam Aragorno rekuris por helpi lin.

La klappordo estis denove fermita, la fera pordego estis barita kaj ŝtonoj estis amasigitaj interne. Kiam ĉiuj estis sekuraj ene, Eomero sin turnis:

— Mi dankas vin, Gimlio, filo de Gloino! — li diris. — Mi ne sciis, ke vi partoprenis la eliratakon. Sed ofte gasto neinvitita pruviĝas la plej valora ĉeestanto. Kiel okazis, ke vi venis tien?

— Mi sekvis vin por forskui la dormemon, — diris Gimlio; — sed mi rigardis la montaranojn kaj ili ŝajnis iom tro grandaj kompare al mi, do mi sidiĝis apud ŝtono por spekti vian glavludon.

— Ne estos facile por mi repagi la ŝuldon, — diris Eomero.

— Eble prezentiĝos multaj eblecoj antaŭ ol finiĝos la nokto, — ridis la gnomo. — Sed mi estas kontenta. Ĝis nun mi hakis nur lignon de kiam mi forlasis Morion.

— Du! — diris Gimlio, frapetante sian hakilon. Li jam reokupis sian

lokon sur la muro.

— Ĉu du? — diris Legolaso. — Mi faris pli bone, kvankam nun mi devas palpserĉi pafitajn sagojn; la miaj forsendiĝis. Tamen mi kalkulis, ke mia sumo estas minimume dudek. Sed tio estas nur kelkaj folioj en arbaro.

La ĉielo nun rapide klariĝadis kaj la sinkanta luno brilis hele. Sed la lumo alportis malmulte da espero al la rajdistoj de Markio. La malamikaro antaŭ ili ŝajnis plimultiĝinta anstataŭ male, kaj ankoraŭ aliaj impetis supren el la valo tra la breĉo. La eliratako sur la Roko gajnis nur mallongan prokraston. La atako kontraŭ la pordegon duobliĝis. Kontraŭ la Profundaĵan Muron la trupoj de Isengardo muĝis kvazaŭ maro. Orkoj kaj montaranoj svarmis ĉirkaŭ ties subo de unu flanko al alia. Ŝnuregoj kun kroĉhokoj estis ĵetitaj trans la parapeton pli rapide ol homoj povis tratranĉi ilin aŭ ilin reĵeti. Centoj da longaj eskaloj estis starigitaj. Multaj estis reĵetitaj ruinige sed multaj aliaj anstataŭis ilin, kaj orkoj rapide grimpis kiel simioj en la malhelaj arbaroj de la sudo. Antaŭ la mura subaĵo la mortintoj kaj frakasitoj estis amasigitaj kiel ŝtonetoj en ŝtormo; ĉiam pli alten kreskis la hidaj amasoj, kaj daŭre avancis la malamikoj.

La rohananoj eklaciĝis. Ĉiuj sagoj estis pafitaj kaj ĉiuj lancoj estis ĵetitaj; iliaj glavoj estis noĉitaj, kaj iliaj ŝildoj estis fenditaj. Trifoje Aragorno kaj Eomero kuraĝigis ilin, kaj trifoje Andurilo flamis en furioza impeto kiu forpelis la malamikojn de la muro.

Tiam aŭdiĝis bruego en la Profundaĵo malantaŭe. Orkoj rampis kiel ratoj tra la subirejo per kiu la rojo elfluis. Tie ili kuniĝis en ombro de la klifoj ĝis la atako supre estis plej arda kaj preskaŭ ĉiuj defendantoj kuregis al la mura supraĵo. Tiam ili elsaltis. Jam kelkaj enpasis la makzelojn de la Profundaĵo kaj troviĝis inter la ĉevaloj, luktante kun la gardistoj.

Suben desur la muro saltis Gimlio kun feroca krio kiu eĥis inter la klifoj. "*Khazâd! Khazâd*!" — Li baldaŭ havis sufiĉe da laboro.

— Aj-oj! — li kriegis. — La orkoj estas malantaŭ la muro. Aj-oj! Venu, Legolaso! Sufiĉas por ni ambaŭ. *Khazad ai-menu*!

Gamlingo la Maljuna suben rigardis de Kornburgo, aŭdante la fortan voĉon de la gnomo malgraŭ la tuta tumulto.

— La orkoj en la Profundaĵo! — li kriis. — Helm! Helm! Ek Helmidoj! — li elpuŝis subensaltante laŭ la ŝtuparo de la Roko kun multaj viroj el Ŭestfaldo ĉedorse.

Ilia atako estis feroca kaj subita, kaj la orkoj cedis antaŭ ili. Post nelonge ili estis kunpremitaj en la ravinaj stretejoj, kaj ĉiuj estis mortigitaj aŭ pelitaj kriĉe en la abismon de la Profundaĵo por fali antaŭ la gardistoj de l' kaŝitaj kavernoj.

— Dudek unu! — kriis Gimlio. Li faris dumanan hakon kaj faligis la

lastan orkon antaŭ siaj piedoj. — Nun mia kalkulo denove superas tiun de mastro Legolaso.

— Ni devas ŝtopi tiun ĉi ratotruon, — diris Gamlingo. — Onidire gnomoj estas lertuloj pri ŝtono. Aldonu vian helpon, mastro!

— Ŝtonojn ni ne formas per niaj hakiloj, nek per niaj fingrungoj, — diris Gimlio. — Sed mi kunlaboros laŭpove.

Ili kunrastis tiajn etajn rokojn kaj rompitajn ŝtonojn, kiajn ili trovis ĉemane, kaj direktataj de Gimlio la ŭestfaldanoj baris la internan ekstremaĵon de la subirejo ĝis nur mallarĝa trafluejo restis. Tiam la Profundaĵa Rojo, ŝveligita de la pluvo, kirlis kaj ĝeniĝis en sia ŝtopita pado, kaj disvastiĝis malrapide laŭ fridaj flakoj de klifo al klifo.

— Estos pli seke supre, — diris Gimlio. — Venu, Gamlingo, ni vidu kiel aferoj progresas sur la muro!

Li grimpis supren kaj trovis Legolason apud Aragorno kaj Eomero. La elfo akrigis sian longan tranĉilon. Okazis provizora paŭzo en la atako, post kiam malsukcesis la klopodo eniri tra la subirejo.

— Dudek unu! — diris Gimlio.

— Bone! — diris Legolaso. — Sed mia kalkulo estas jam dudek kvar. Okazis ĉi tie tranĉila laboro.

Eomero kaj Aragorno lace apogis sin per siaj glavoj. Fore maldekstre la kunfrapiĝo kaj bruego de la batalo sur la Roko laŭtiĝis denove. Sed Kornburgo daŭre rezistis, kiel insulo en la maro. Ĝia pordo kuŝis ruinigite; sed trans la barilon el traboj kaj ŝtonoj interne neniu malamiko ĝis nun pasis.

Aragorno rigardis la palajn stelojn, kaj la lunon nun descendantan malantaŭ la okcidentajn montetojn, kiuj enfermis la valon.

— Tiu ĉi nokto longas kiel jaroj, — li diris. — Kiom longe prokrastiĝos la tago?

— Tagiĝo ne malproksimas, — diris Gamlingo, kiu jam grimpis ĝis apud li. — Sed tagiĝo ne helpos nin, mi timas.

— Tamen tagiĝo estas ĉiam espero de la homoj, — diris Aragorno.

— Sed jenaj kreaĵoj de Isengardo, ĉi duonorkoj kaj goblenoj breditaj per la filerto de Sarumano, ne ŝanceliĝos pro la suno, — diris Gamlingo. — Ankaŭ ne la sovaĝuloj el la montaro. Ĉu vi ne aŭdas iliajn voĉojn?

— Mi aŭdas, — diris Eomero; — sed por miaj oreloj tio estas nura kriĉado de birdoj kaj muĝado de bestoj.

— Tamen troviĝas multaj, kiuj krias en la Dunlanda lingvo, — diris Gamlingo. — Tiun lingvon mi konas. Ĝi estas antikva homa lingvo, kaj iam estis parolata en multaj okcidentaj valoj de Markio. Aŭdu! Ili malamegas nin kaj ĝojas, ĉar nia pereo ŝajnas al ili certa. “La reĝon, la reĝon! — ili

krias. — Ni kaptos ilian reĝon. Morton al la Forgoj! Morton al la Pajlokapuloj! Morton al la rabistoj el la nordo!” Tiel ili foje nomas nin. Dum duonmilo da jaroj ili ne forgesas sian ofendon pro tio, ke la mastroj de Gondoro donis Markion al Eorlo la Juna kaj alianciĝis al li. Tiun pramalamon Sarumano flamigis. Ili estas popolo feroca kiam agitita. Ili ne cedos jam pro vesperkrepusko aŭ tagiĝo ĝis Teodeno estos kaptita aŭ ili mem estos mortigitaj.

— Malgraŭe, taglumo alportos esperon al mi, — diris Aragorno. — Ĉu ne estas dirite, ke neniu malamiko iam ajn kaptis Kornburgon, se homoj ĝin defendis?

— Tion diras la menestreloj, — diris Eomero.

— Do ni defendu ĝin kaj esperu! — diris Aragorno.

Ĝuste dum ili parolis, aŭdiĝis fanfaro de trumpetoj. Poste okazis frakaso kaj flagro da flamoj kaj fumo. La akvoj de la Profundaĵa Rojo elverŝiĝis siblante kaj ŝaŭmante: ili ne plu estis malhelpataj, gapa truo estis eksplode farita en la muro. Amaso da malhelaj figuroj enverŝiĝis.

— Demonaĵo de Sarumano! — kriis Aragorno. — Ili enrampis denove la subfluejon dum ni parolis kaj ili bruligis la fajron de Ortanko sub niaj piedoj. Elendilo, Elendilo! — li kriis saltante suben en la breĉon; sed ĝuste kiam li tion faris, cento da eskaloj estis starigitaj al la krenelaro. Trans la muron kaj sub la muron la lasta atako venis balae kiel malhela ondo sur sablaltaĵon. La defendantoj estis forpuŝitaj. Iuj el la rajdantoj estis retropelitaj, pli kaj pli funden en la Profundaĵon, falante kaj luktante dum ili cedis paŝon post paŝo al la kavernoj. Aliaj hakis vojon reire al la citadelo.

Larĝa ŝtuparo supreniris de la Profundaĵo ĝis la Roko kaj la malantaŭa pordo de Kornburgo. Proksime al la subo staris Aragorno. En lia mano plu brilis Andurilo, kaj teruro pro la glavo dum kelka tempo prokrastigis la malamikojn, dum ĉiuj, kiuj povis alveni la ŝtuparon, pasis supren al la pordo. Malantaŭe sur la supraj ŝtupoj genuis Legolaso. Lia pafarko estis streĉita, sed restis al li nur unu trovita sago, kaj li nun elgvatis, preta pafi la unuan orkon kiu aŭdacus proksimiĝi al la ŝtuparo.

— Ĉiuj kiuj povas jam sekuras ene, Aragorno, — li vokis. — Retrovenu!

Aragorno sin turnis kaj rapidis supren laŭ la ŝtuparo, sed kurante li stumblis pro laceco. Tuj liaj malamikoj saltis antaŭen. Supren venis la orkoj, kriante, kun la longaj brakoj etenditaj por kapti lin. La plej antaŭa falis kun la lasta sago de Legolaso en sia gorĝo, sed la ceteraj transsaltis lin. Tiam granda rokego ĵetita de sur la ekstera muro supre subenkrakegis sur la ŝtuparon kaj reĵetis ilin en la Profundaĵon. Aragorno atingis la pordon, kaj rapide ĝi gonge fermiĝis malantaŭ li.

— La aferoj iras malbone, miaj amikoj, — li diris, viŝante la ŝviton de sia frunto per la brako.

— Sufiĉe malbone, — diris Legolaso, — sed ankoraŭ ne senespere, dum vi estas ĉe ni. Kie estas Gimlio?

— Mi ne scias, — diris Aragorno. — Mi lastfoje lin vidis batalanta surtere malantaŭ la muro, sed la malamikoj disbalais nin.

— Ve! Tio estas misa novaĵo, — diris Legolaso.

— Li estas brava kaj forta, — diris Aragorno. — Ni esperu, ke li eskapos al la kavernoj. Tie li estos sekura dum kelka tempo. Pli sekura ol ni. Tia rifuĝejo plaĉos al gnomo.

— Tio devas esti mia espero, — diris Legolaso. — Sed mi volus, ke li venu ĉi tien. Mi volus sciigi al Mastro Gimlio, ke mia kalkulo estas jam tridek naŭ.

— Se li sukcesos reatingi la kavernojn, li denove superos vian kalkulon, — ridis Aragorno. — Neniam mi vidis hakilon tiom svingitan.

— Mi devas iri por serĉi kelkajn sagojn, — diris Legolaso. — Se nur finiĝus tiu ĉi nokto tiel, ke mi havu pli bonan lumon por pafado.

Aragorno nun eniris la citadelon. Tie li sciiĝis konsternate, ke Eomero ne atingis Kornburgon.

— Ne, li ne venis al la Roko, — diris unu el la ŭestfaldanoj. — Mi lastfoje vidis lin kunvokanta ĉirkaŭ sin siajn virojn kaj luktanta ĉe la enirejo al la Profundaĵo. Gamlingo estis kun li kaj la gnomo; sed mi ne sukcesis alveni ilin.

Aragorno plupaŝis tra la ena korto kaj supreniris ĝis alta ĉambro en la turego. Tie staris la reĝo, malhela kontraŭ mallarĝa fenestro, elrigardante al la valo.

— Kia novaĵo, Aragorno? — li diris.

— La Profundaĵa Muro estas kaptita, mastro, kaj la tuta defendantaro forbalaita; sed multaj eskapis ĉi tien al la Roko.

— Ĉu Eomero ĉeestas?

— Ne, mastro. Sed multaj el viaj viroj retiriĝis en la Profundaĵon; kaj iuj diras, ke inter ili estis Eomero. En la stretejoj ili povos eble forbari la malamikojn kaj aliri en la kavernojn. Kian esperon ili eble havos tiam, mi ne scias.

— Pli ol ni. Bona provizaĵo, laŭdire. Kaj la aero estas freŝa tie pro truoj per fendaĵoj en la roko forsupre. Neniu povas perforte eniri kontraŭ viroj obstinaj. Ili eble eltenos longe.

— Sed la orkoj alportis demonaĵojn el Ortanko, — diris Aragorno. — Ili havas eksplodigan fajron kaj per ĝi ili kaptis la Muron. Se ili ne sukcesos eniri la kavernojn, ili eble ensigelos tiujn interne. Sed nun ni devas turni

nian tutan penson al nia propra defendo.

— Mi turmentiĝas en tiu ĉi karcero, — diris Teodeno. — Se mi povus celigi lancon, rajdante antaŭ miaj viroj sur la batalkampo, eble mi sentus denove la batalĝojon kaj tiel pereus. Sed ĉi tie mi malmulte utilas.

— Almenaŭ ĉi tie vi estas gardata en la plej forta fortikaĵo de Markio, — diris Aragorno. — Pli da espero defendi vin ni havas en Kornburgo ol en Edoraso, aŭ eĉ ĉe Dunharo en la montaro.

— Oni diras, ke Kornburgo neniam malvenkiĝis atakite, — diris Teodeno; — sed nun mia koro estas dubema. La mondo ŝanĝiĝas, kaj ĉio antaŭe forta jam pruviĝas malcerta. Kiel iu ajn turego kontraŭstaru tian multnombron kaj tian senbridan malamon? Se mi scius ke la forto de Isengardo tiel pligrandiĝis, mi eble ne estus tiel malzorge elrajdinta renkonte al ĝi, malgraŭ ĉiuj lertoj de Gandalfo. Lia konsilo jam ne ŝajnas tiom inda, kiom sub la matena suno.

— Ne prijuĝu la konsilon de Gandalfo ĝis ĉio finiĝos, mastro, — diris Aragorno.

— Finiĝos postnelonge, — diris la reĝo. — Sed mi ne pereos ĉi tie, kaptite kiel maljuna melo en kaptilo. Neĝkolaĵo kaj Hasufelo kaj la ĉevaloj de miaj gardistoj estas en la interna korto. Kiam venos la aŭroro, mi ordonos ke oni sonorigu la kornon de Helmo, kaj mi elrajdos. Ĉu vi rajdos kun mi, filo de Aratorno? Eble mi trahakos vojon, aŭ alvenos tian morton kia meritos prikantadon — se restos poste iuj por kanti pri ni.

— Mi rajdos kun vi, — diris Aragorno.

Adiaŭinte li reiris ĝis la muroj kaj ĉirkaŭiris ties tutan periferion, kuraĝigante la homojn kaj helpante kie ajn la atako plej severis. Legolaso akompanis lin. Eksplodoj da fajro suprensaltis elsube, tremigante la ŝtonojn. Ŝnurhokojn oni ĵetis kaj eskalojn starigis. Ĉiam denove la orkoj atingis la supraĵon de la ekstera muro, kaj ĉiam denove la defendantoj malsuprenigis ilin.

Fine Aragorno ekstaris super la granda pordego ignorante la ĵetlancojn de l' malamikoj. Elrigardante li vidis paliĝon de la orienta ĉielo. Tiam li levis malplenan manon polmantaŭe kiel signon de interparolemo.

La orkoj kriegis kaj mokridis:

— Descendu! Descendu! Se vi emas paroli kun ni, descendu! Elvenigu vian reĝon! Ni estas batalantaj uruk-hajoj. Ni eligos lin el lia truo se li ne venos. Elvenigu vian reĝon sinkaŝan.

— La reĝo venas aŭ iras propravole, — diris Aragorno.

— Do kion vi celas ĉi tie? — ili respondis. — Kial vi elrigardas? Ĉu vi volas konstati la grandecon de nia armeo? Ni estas batalantaj uruk-hajoj.

— Mi elrigardis por vidi la aŭroron, — diris Aragorno.

— Kio pri la aŭroro? — ili mokridis. — Ni estas uruk-hajoj: ni ne ĉesigas bataladon pro nokto aŭ tago, pro bela vetero aŭ pro ŝtormo. Ni venas por mortigi, sub suno aŭ luno. Kio pri la aŭroro?

— Neniu scias, kion alportos nova tago, — diris Aragorno. — Iru for, antaŭ ol ĝi iĝos misa por vi.

— Descendu aŭ ni depafos vin de la muro, — ili kriis. — Tio ĉi neniel estas interparolo. Nenion vi havas por diri.

— Mi ankoraŭ havas jenon por diri, — respondis Aragorno. — Ĝis nun neniu malamiko breĉis Kornburgon. Foriru, aŭ eĉ unu el vi ne estos indulgita. Eĉ unu ne restos por reporti informojn al la nordo. Vian endanĝeriĝon vi ne rekonas.

Tiom fortaj estis la potenco kaj reĝeco rivelitaj en Aragorno dum li staris sola super la ruinigita pordego antaŭ la amaso de siaj malamikoj, ke multaj el la sovaĝuloj paŭzis kaj retrorigradis trans la ŝultron al la valo, kaj iuj supren rigardis dubeme al la ĉielo. Sed la orkoj ridis laŭtvoĉe; kaj hajlo da ĵetlancoj kaj sagoj fajfis trans la muron, dum Aragorno saltis suben.

Okazis blekego kaj fajreksplodo. La arkaĵo de l' pordego, sur kiu li antaŭ momento staris, diseriĝis kaj falis en fumo kaj polvo. La barikado estis dispelita kvazaŭ per fulmosago. Aragorno kuris al la turego de l' reĝo.

Sed ĝuste kiam falis la pordego kaj la ĉirkaŭantaj ĝin orkoj kriegis prepare al sturmado, leviĝis murmuro malantaŭ ili kvazaŭ fora vento, kaj tio iĝis bruego de multaj voĉoj kriantaj strangajn novaĵojn en la aŭroro. La orkoj sur la Roko, aŭdante la indikon pri konsterniĝo, hezitis kaj retrorigardis. Kaj tiam, subita kaj terura, el la turego supre sonoris la sono de la granda korno de Helmo.

Ĉiuj aŭdintaj tiun sonon tremis. Multaj orkoj alteriĝis survizaĝen kaj kovris per la ungegoj siajn orelojn. Denove el la Profundaĵo venis la eĥoj, skualon post skualo, kvazaŭ sur ĉiuj klifoj kaj montetoj starus potenca heroldo. Sed sur la muroj homoj suprenrigardis, mire aŭskultante; ĉar la eĥoj ne formortis. Ĉiam la kornskualoj alproksimiĝis inter la montetoj; jam pli proksimaj kaj pli laŭtaj ili respondis unu alian, blovante feroce kaj libere.

— Helmo! Helmo! — la rajdistoj kriis. — Helmo leviĝis kaj revenas al la milito. Helmo por reĝo Teodeno!

Kaj post tiu krio la reĝo venis. Lia ĉevalo estis neĝe blanka, ora estis lia ŝildo, kaj lia lanco estis longa. Dekstre de li estis Aragorno, heredanto de Elendilo, malantaŭ li rajdis la princoj de la Domo de Eorlo la Juna. Lumo saltis surĉielen. Foriris la nokto.

— Ek Eorlidoj!

Kun krio kaj granda bruo ili sturmis. Suben el la pordego ili rapidis, trans la digvojon ili galopis, kaj ili trafendis la Isengardajn amasojn kvazaŭ

vento la herbon. Malantaŭ tiuj el la Profundaĵo venis la senkompataj krioj de homoj eliĝantaj el la kavernoj, elpelante la malamikojn. Elverŝiĝis ĉiuj homoj restintaj sur la Roko. Kaj ĉiam la sono de blovataj kornoj eĥis en la montetaro.

Plu ili rajdis, la reĝo kaj ties kunuloj. Estroj kaj fortuloj falis aŭ fuĝis antaŭ ili. Nek orko nek homo kontraŭstaris ilin. Iliaj dorsoj turniĝis al la glavoj kaj lancoj de la rajdistoj kaj iliaj vizaĝoj al la valo. Ili kriis kaj ululis, ĉar timo kaj mirego trafis ilin ĉe la sunleviĝo.

Do reĝo Teodeno elrajdis de la Pordo de Helmo kaj trafendis sian vojon al la granda Ŝtonmuro. Tie la grupo haltis. Lumo ekheliĝis ĉirkaŭ ili. Lumstrioj de la suno flagris super la orientaj montetoj kaj ekbrilis sur iliaj lancoj. Sed ili sidis silente sur siaj ĉevaloj kaj ili rigardadis suben al la Profundaĵa Kavaĵo.

La lando estis ŝanĝita. Kie antaŭe kuŝis la verda valeto kun herbaj deklivoj randantaj la ĉiamaltiĝajn montetojn, nun baŭmis arbarego. Grandaj arboj nudaj kaj silentaj staris, vicon post vico, kun implikitaj branĉoj kaj prujnaj kapoj; iliaj torditaj radikoj estis subigitaj per la longa verda herbo. Mallumo estis sub ili. Inter la ŝtonmuro kaj la rando de tiu sennoma arbaro kuŝis nur kvaronmejlo aperta. Tie jam kaŭris la fieraj amasoj de Sarumano, teruritaj pro la reĝo kaj teruritaj pro la arboj. Ili subenfluis de la Pordo de Helmo ĝis ĉie super la barilo ili malestis, sed sube de ĝi ili estis kunpremitaj kvazaŭ svarmantaj muŝoj. Vane ili rampis kaj grimpis ĉirkaŭ la flankojn de la kavejo, klopodante eskapi. Oriente tro apika kaj ŝtonoza estis la flanko de la valo; maldekstre, el la okcidento, ilia finsorto proksimiĝis.

Tie subite sur firsto aperis rajdanto blanke vestita, brilanta en la leviĝanta sunlumo. Trans la malaltaj montetoj aŭdiĝis la kornoj. Malantaŭ li, rapidante suben laŭ la longaj deklivoj, estis mil piedsoldatoj; en iliaj manoj estis glavoj. Inter ili paŝis viro alta kaj forta. Ties ŝildo estis ruĝa. Atinginte la randon de la valo li albuŝigis grandan nigran kornon kaj sonigis sonoran blovon.

— Erkenbrando! — la rajdistoj kriis. — Erkenbrando!

— Vidu la Blankan Rajdanton! — kriis Aragorno. — Gandalfo revenis!

— Mitrandiro, Mitrandiro! — diris Legolaso. — Jen vera sorĉaĵo! Venu! Mi volas rigardi tiun arbaron antaŭ ol ŝanĝiĝos la envulto.

La amasoj de Isengardo blekis, balanciĝante tien kaj reen, turnante sin de timo al timo. Denove sonoris la korno el la turego. Suben tra la breĉo de la Ŝtonmuro sturmis la reĝa grupo. Suben de la monteto saltis Erkenbrando, mastro de Ŭestfaldo. Suben saltis Ombrofakso kvazaŭ cervo kiu kuras senstumble sur la montoj. La Blanka Rajdanto estis veninta, kaj teruro pro ties alveno plene frenezigis la malamikojn. La sovaĝuloj falis survizaĝen

antaŭ li. La orkoj kirliĝis, kriĉis kaj forĵetis la glavojn kaj lancojn. Kvazaŭ nigra fumo pelata per fortiĝanta vento ili fuĝis. Ululante ili pasis en la atendantan ombron de la arboj; kaj el tiu ombro neniu el ili iam reaperis.

8

La vojo al Isengardo

Tiel okazis ke en la lumo de bela mateno Reĝo Teodeno kaj Gandalfo la Blanka Rajdanto renkontiĝis denove sur la verda herbo apud la Profundaĵa Rojo. Tie estis ankaŭ Aragorno, filo de Aratorno, kaj Legolaso la elfo, kaj Erkenbrando el Ŭestfaldo, kaj la princoj de la Ora Domo. Ĉirkaŭ ili kuniĝis la rohananoj, la rajdistoj de Markio: miro venkis ilian ĝojon pro la venko kaj iliaj okuloj turniĝis al la arbaro. Subite aŭdiĝis laŭta krio kaj descendis de la ŝtonmuro tiuj, kiuj estis retropelitaj en la Profundaĵon. Venis Gamlingo la Maljuna kaj Eomero filo de Eomundo, kaj apud ili marŝis la gnomo Gimlio. Tiu havis neniun kaskon, kaj ĉirkaŭis lian kapon lina bandaĝo sangomakulita, sed lia voĉo laŭtis kaj fortis.

— Kvardek du, mastro Legolaso! — li kriis. — Ve! Mia hakilo estas noĉita: la kvardek-dua portis feran kolumon ĉe la gorĝo. Kaj kiel ĉe vi?

— Vi superis per unu mian sumon, — respondis Legolaso. — Sed mi ne domaĝas al vi la ludon, ĉar mi tiom ĝojas revidi vin surkruran!

— Bonvenon, Eomero, fratina filo! — diris Teodeno. — Nun vidante vin sekura mi vere tre ĝojas.

— Saluton, Mastro de Markio! — diris Eomero. — La malluma nokto jam pasis, kaj la taglumo revenis. Sed tiu tago alportis novaĵojn strangajn. — Li turnis sin kaj rigardadis mire unue la arbaron kaj poste Gandalfon. — Ankoraŭfoje vi venis en la horo de bezono, neatendite, — li diris.

— Ĉu neatendite? — diris Gandalfo. — Mi diris, ke mi revenos kaj renkontos vin ĉi tie.

— Sed la horon vi ne difinis, nek antaŭdiris la kielon de via alveno. Helpon strangan vi kunvenigis. Vi estas sorĉiste potenca, Gandalfo la Blanka!

— Povas esti. Sed se jes, mi ankoraŭ ne montris tion. Mi nur havigis bonan konsilon en danĝera momento kaj utiligis la rapidecon de Ombrofakso. Pli multon faris via propra kuraĝo kaj la fortaj kruroj de la ŭestfaldanoj tramarŝintaj la nokton.

Tiam ĉiuj rigardis Gandalfon eĉ pli funde mirantaj. Iuj ekrigardis sombre la arbaron, kaj pasigis siajn manojn trans la fruntojn kvazaŭ ili supozus, ke iliaj okuloj vidas malsame kiel liaj.

Gandalfo ridis longe kaj gaje:

— Ĉu la arboj? Nu, mi vidas tiel klare kiel vi la arbaron. Tio estas neniu

faro mia. Tio estas afero ekster la kompetento de saĝuloj. Pli bona ol mia intenco kaj pli bona eĉ ol mia espero pruviĝis la evento.

— Do se ne via, kies la envulto? — demandis Teodeno. — Ne de Sarumano, tio estas evidenta. Ĉu ekzistas la saĝulo pli potenca pri kiu ni ankoraŭ ne sciiĝis?

— Ne temas pri envulto sed pri potenco multe pli malnova, — diris Gandalfo: — potenco, kiu trapromenis la teron antaŭ ol elfoj kantis aŭ marteloj sonoris.

Ol elmuldiĝis arb' aŭ fero,
sublune junis monta tero;
ol ringo aŭ dolor' maŝatis,
arbarojn prae ĝi paŝadis.

— Kaj kio estas la solvo de via enigmo? — diris Teodeno.

— Se vi volas ekscii tion, vi devus akompani min al Isengardo, — respondis Gandalfo.

— Ĉu al Isengardo? — ili ekkriis.

— Jes, — diris Gandalfo. — Mi reiros al Isengardo, kaj kiuj volas, tiuj povos akompani min. Tie ni eble vidos strangajn aferojn.

— Sed ne troviĝas sufiĉaj viroj en Markio, eĉ se ili ĉiuj estus kunvokitaj kaj kuracitaj je l' vundoj kaj laceco, por ataki la fortikaĵon de Sarumano, — diris Teodeno.

— Tamen al Isengardo mi iros, — diris Gandalfo. — Ne longe mi restos tie. Mia vojo jam troviĝas orienten. Atendu min en Edoraso antaŭ la lunmalkresko!

— Ne! — diris Teodeno. — En la malluma horo antaŭ la tagiĝo mi dubis, sed ni jam ne disiĝos. Mi akompanos vin, se tion vi konsilas.

— Mi volas interparoli kun Sarumano kiel eble plej baldaŭ, — diris Gandalfo, — kaj pro tio ke li faris al vi grandan malutilon, estus inde se vi ĉeestus. Sed kiel baldaŭ kaj kiel rapide vi ekrajdos?

— Miaj viroj lacas pro la batalo, — diris la reĝo, — kaj ankaŭ mi estas laca. Ĉar mi longe rajdis kaj dormis malmulte. Ve! Mia maljuneco ne estas ŝajnigata nek rezultas de la flustroj de Vermlango. Ĝi estas malsano, kiun povas forigi neniu kuracisto, eĉ ne Gandalfo.

— Do ripozu nun ĉiuj, kiuj rajdos kun mi, — diris Gandalfo. — Mi ekvojaĝos sub ombro de la vespero. Tio estos konvena; ĉar mia konsilo estas, ke ekde nun niaj venoj kaj iroj estu laŭeble sekretaj. Sed ne ordonu, ke multaj akompanu vin, Teodeno. Ni iras por interparoli, ne por batali.

La reĝo elektis virojn, kiuj estis nevunditaj kaj posedis ĉevalojn rapidajn, kaj li forsendis ilin kun raporto pri la venko al ĉiu valo de Markio;

kaj ili kunportis ankaŭ lian alvokon ordonantan, ke ĉiuj viroj, tiel junaj kiel maljunaj, venu haste al Edoraso. Tie la Mastro de Markio starigos kunvenon de ĉiuj kapablaj porti armilojn, je la dua tago post la plenluno. Por rajdi kun li al Isengardo la reĝo elektis Eomeron kaj dudek virojn el sia domanaro. Kun Gandalfo iros Aragorno, Legolaso kaj Gimlio. Malgraŭ sia vundo la gnomo ne konsentis postresti.

— Tio estis bato nur febla kaj la kasko flankenigis ĝin, — li diris. — Necesas pli ol tia orka grateto por deteni min.

— Mi prizorgos ĝin, dum vi ripozos, — diris Aragorno.

La reĝo nun reiris al Kornburgo kaj dormis tian trankvilan dormon, kian li dum multaj jaroj ne spertis, kaj ankaŭ la cetero de lia elektita grupo ripozis. Sed la aliaj, ĉiuj kiuj ne vundiĝis, komencis grandan taskon; ĉar multaj falis dum la batalo kaj kuŝis mortaj sur la batalkampo aŭ en la Profundaĵo.

Neniuj orkoj restis vivantaj; iliaj kadavroj ne estis kalkulitaj. Sed tre multaj el la montaranoj estis kapitulaciintaj; kaj tiuj timis kaj petegis indulgon.

La viroj de Markio forprenis ties armilojn kaj laborigis ilin.

— Helpu nun ripari la mison en kiu vi partoprenis, — diris Erkenbrando, — kaj poste vi ĵuros neniam plu transpasi armite la Travadejojn de Iseno, nek marŝi kun la malamikoj de l' homoj; kaj poste vi reiros liberaj al via lando. Ĉar vin trompis Sarumano. Multaj el vi ricevis la morton kiel rekompencon por via fido je li; sed se vi venkus, apenaŭ pli agrabla estus via salajro.

La viroj el Dunlando estis mirigitaj, ĉar Sarumano diris al ili, ke la rohananoj estas kruelaj kaj bruligas siajn kaptitojn vivantaj.

Meze de la kampo antaŭ Kornburgo du tumuloj estis kreitaj, kaj sub ili oni kuŝigis ĉiujn rajdistojn de Markio, kiuj falis en la defendo, tiujn el la Orientaj Valoj unuflanke kaj aliflanke tiujn el Ŭestfaldo. Sola en tombo sub ombro de Kornburgo kuŝis Hamo, estro de la reĝaj gvardianoj. Li mortis antaŭ la Pordego.

La orkojn oni staplis grandamase, for de la homaj teramasoj, ne malproksime de la arbarorando. Kaj la popolo mense ĝeniĝis; ĉar la amasoj da karnaĵo estis tro grandaj por enterigo aŭ bruligo. Malmulte da ligno ili havis por bruligi, kaj neniu aŭdacus ekhaki la strangajn arbojn, eĉ se Gandalfo ne avertus, ke ili domaĝu nek al arboŝelo nek al branĉoj pro la granda danĝero.

— Lasu kuŝi la orkojn, — diris Gandalfo, — Mateno eble alportos freŝan konsilon.

Posttagmeze la reĝa trupo pretiĝis foriri. La enteriga laboro nur

komenciĝis; kaj Teodeno funebris pro la perdo de Hamo, lia kapitano, kaj ĵetis la unuan teron sur lian tombon.

— Grandan malutilon ja faris al mi Sarumano kaj al tiu ĉi tuta lando, — li diris, — kaj tion mi rememoros kiam ni renkontiĝos.

La suno jam proksimiĝis al la montetoj okcidente de la plataĵo, kiam finfine Teodeno kaj Gandalfo kaj iliaj kunuloj ekrajdis malsupren de la Ŝtonmuro. Malantaŭ ili staris kune granda homamaso, tiel el rajdistoj kiel el la popolo Ŭestfalda, maljunaj kaj junaj, virinoj kaj infanoj, kiuj venis el la kavernoj. Kanton pri venko ili kantis per klaraj voĉoj; kaj poste ili silentiĝis, scivolante kio okazos, ĉar iliaj okuloj direktiĝis al la arboj kaj tiujn ili timis.

La rajdistoj alvenis la arbaron kaj ili haltis; ĉevaloj kaj homoj ne volis eniri. La arboj estis grizaj kaj minacaj kaj ĉirkaŭis ilin ia ombro aŭ nebuleto. La ekstremoj de iliaj longaj disetenditaj branĉoj pendis suben kvazaŭ fingroj serĉemaj, iliaj radikoj elstaris sur la tero kvazaŭ membroj de strangaj monstroj, kaj malhelaj kavernoj apertis sub ili. Sed Gandalfo iris antaŭen, kondukante la kunularon, kaj kie la vojo el Kornburgo renkontis la arbojn, tie ili nun vidis malfermaĵon kiel arkan pordon sub fortegaj branĉoj; kaj tra ĝi pasis Gandalfo, kaj ili sekvis lin. Tiam mirigite ili konstatis, ke la vojo pluiras kaj apudas la Profundaĵa Rojo; kaj supre la ĉielo estis aperta kaj plena je ora lumo. Sed krepusko jam envolvis ambaŭflanke la grandajn flanknavojn de la arbaro, etendiĝantajn en nepenetreblajn ombrojn. Kaj tie oni aŭdis grincadon kaj ĝemadon de branĉoj, kaj forajn kriojn, kaj koleran murmuron de voĉoj senvortaj. Neniu orko aŭ alia vivantaĵo videblis.

Legolaso kaj Gimlio nun rajdis kune sur unu ĉevalo; kaj ili restis proksime al Gandalfo, ĉar Gimlio timis la arbaron.

— Estas varmege ĉi tie, — diris Legolaso al Gandalfo. — Mi sentas ĉirkaŭ mi koleregon. Ĉu vi ne sentas en viaj oreloj pulsadon de la aero?

— Jes, — diris Gandalfo.

— Kio okazis al la mizeraj orkoj? — demandis Legolaso.

— Tion, laŭ mia opinio, neniu iam scios, — diris Gandalfo.

Ili rajdis silente dum kelka tempo; sed Legolaso senĉese ekrigardis de flanko al flanko, kaj ofte haltus por aŭskulti la arbarajn sonojn, se tion permesus Gimlio.

— Jen estas la plej strangaj arboj, kiujn mi iam vidis, — li diris; — kaj mi vidis multajn kverkojn kreski de glanoj ĝis ruiniga maljuneco. Mi volas ke nun estu malhasto, ke mi povu promeni inter ili: ili havas voĉojn, kaj post kelka tempo mi eble ekkomprenus ilian pensadon.

— Ne, ne! — diris Gimlio. — Ni lasu ilin! Mi jam divenis ilian pensadon: malamegon al ĉio, kio marŝas dukrure; kaj ili parolas pri premado kaj strangolado.

— Ne al ĉio, kio marŝas dukrure, — diris Legolaso. — Pri tio mi opinias, ke vi malpravas. La orkojn ili malamegas. Ĉar ili ne indiĝenas ĉi tie kaj scias malmulton pri elfoj kaj homoj. Tre malproksimaj estas la valoj kie ili naskiĝis. El la profundaj valoj de Fangorno, Gimlio, de tie ili venis laŭ mia supozo.

— Sekve tio estas la plej danĝeroplena arbaro en Mez-Tero, — diris Gimlio. — Mi devus esti dankema pro la rolo ludita de ili, sed mi ne amas ilin. Vi eble taksas ilin mirindaj, sed pli grandan mirindaĵon mi vidis en tiu ĉi lando, pli belan ol iu ajn bosko aŭ arbara maldensejo iam ajn kreskintaj: mia koro estas ankoraŭ plena pro ĝi.

» Strangaj estas la moroj de la homoj, Legolaso! Ĉi tie oni havas unu el la mirindaĵoj de la Norda Mondo, kaj kion ili diras pri ĝi? Kavernoj, ili diras! Kavernoj! Truoj alfuĝindaj en milita tempo, en kiuj oni stoku furaĝon! Bona mia Legolaso, ĉu vi scias, ke la kavernoj en la Profundaĵo de Helmo estas vastaj kaj belaj? Okazus senfina pilgrimado de gnomoj, nur por rigardi ilin, se tiaj aferoj estus konataj. Jes, efektive, oni pagus per pura oro por mallonga ekrigardo!

— Kaj mi pagus per oro por esti forpermesata, — diris Legolaso, — kaj duoble tiom por esti liberigita, se mi hazarde envagus tien!

— Vi tion ne vidis, do mi pardonas vian ŝercon, — diris Gimlio. — Sed vi parolas stultulece. Ĉu vi taksas belaj tiujn halojn, en kiuj loĝas via reĝo sub la monteto en Mornarbaro, kies konstruadon kunhelpis antaŭ longe gnomoj? Ili estas nuraj domaĉoj kompare kun la kavernoj, kiujn mi vidis ĉi tie: haloj nemezureblaj, plenigitaj de ĉiama muziko akva kiu tintas en lagetojn, tiel bela kiel Ĥeled-Zaram en stela lumo.

» Kaj, Legolaso, kiam torĉoj estas ĉenditaj kaj homoj promenas sur la sablaj plankoj sub la eĥantaj kupoloj, ha! tiam, Legolaso, gemoj kaj kristaloj kaj vejnoj en valora erco ekbrilas en la poluritaj muroj; kaj lumo traardas tra falditaj marmoroj, konksimilaj, diafanaj kiel la vivaj manoj de reĝino Galadriela. Troviĝas kolonoj blankaj kaj safranaj kaj aŭrororuĝetaj, Legolaso, kanelitaj kaj torditaj je sonĝecaj formoj; ili abruptas supren de multkoloraj plankoj renkonte al la glimantaj pendaĵoj de la plafono: aloj, ŝnuroj, kurtenoj delikataj kiel glaciiĝintaj nuboj; lancoj, standardoj, pinakloj de pendigitaj palacoj! Senmovaj lagoj spegulas ilin: glima mondo suprenrigardas el malhelaj lagetoj kovritaj per klara vitro; tiaj urboj, kiajn la menso de Durino apenaŭ kapablus imagi dumdorme, plu etendiĝas tra avenuoj kaj pilastraj kortoj ĝis en nigrajn alkovojn, kien povas atingi neniom da lumo. Kaj tint! Falas arĝenta akvero, kaj la rondaj sulketoj en la vitro kurbigas kaj tremigas ĉiujn turojn kvazaŭ lolojn kaj koralojn en mara groto. Poste venas vespero: ili velkas kaj brilete estingiĝas; la torĉoj pluiras

en alian ĉambron kaj alian revon. Ekzistas ĉambro post ĉambro, Legolaso; halo apertanta el halo, kupolo post kupolo, ŝtuparo post ŝtuparo; kaj daŭre la serpentumantaj padoj kondukadas en la kernon de la montego. Kavernoj! La Kavernoj de la Profundaĵo de Helmo! Feliĉa estis la hazardo, kiu pelis min tien! Plorigas min la forlaso.

— Do, mi deziras por vi jenan sorton por via konsolado, Gimlio, — diris la elfo, — ke vi eliru sendomaĝe el la milito kaj revenu por denove vidi ilin. Sed ne sciigu al via parencaro! Ŝajnas, ke restas malmulto kiun ili povas fari, laŭ via rakonto. Eble la homoj ĉi-landaj saĝe diras malmulton: unu familio da laboremaj gnomoj kun marteloj kaj ĉiziloj eble detnms pli ol ĝi kreus.

— Ne, vi ne komprenas, — diris Gimlio. — Neniu gnomo povus resti neemociita pro tia beleco. Neniu el la Durina raso minus tiujn kavernojn por ŝtonoj aŭ ercoj, eĉ ne se diamantoj kaj oro estus haveblaj tie. Ĉu vi detranĉas boskojn da florantaj arboj en la printempo por brulligno? Ni kulturus tiujn maldensejojn da floranta ŝtono, ne elhakus ilin. Per singarda lerto, frapeto post frapeto — rokereto kaj neniom pli, eble, dum tuta maltrankvila tago — tiel ni laborus, kaj kun paso de la jaroj ni aperigus novajn vojetojn kaj eksponus forajn ĉambrojn kiuj ankoraŭ mallumas, ekvideblaj nur kiel malplenaĵoj post fendetoj sur la roko. Kaj lumoj, Legolaso! Ni kreus lumilojn, tiajn lampojn, kiaj iam brilis en Ĥazad-Dumo; kaj kiam ni volus, ni forpelus la nokton, kiu regas tie de kiam estis kreitaj la montoj; kaj kiam ni dezirus ripozi, ni permesus al la nokto reveni.

— Vi emocias min, Gimlio, — diris Legolaso. — Mi neniam antaŭe aŭdis vin tiel paroli. Vi preskaŭ igas min bedaŭri, ke tiujn kavernojn mi ne vidis. Ek! Ni interkonsentu — se ni ambaŭ revenos sendomaĝe el la danĝeroj nin atendantaj, ni vojaĝos dum kelka tempo kune. Vi vizitos kun mi Fangornon kaj poste mi akompanos vin por vidi la Profundaĵon de Helmo.

— Tiun revenvojon mi ne elektus, — diris Gimlio. — Sed mi tolerus Fangornon, se mi havus vian promeson reveni al la kavernoj kaj dividi kun mi ties mirindaĵojn.

— Vi havas mian promeson, — diris Legolaso. — Sed ve! Ni jam devos postlasi tiel la arbojn kiel la kavernojn dum kelka tempo. Vidu! Ni proksimiĝas al la fino de la arboj. Kiom longa vojo ĝis Isengardo, Gandalfo?

— Proksimume dek kvin leŭgoj, kiel flugas la korvoj de Sarumano, — diris Gandalfo: — kvin de la enirejo de Profundaĵa Platejo ĝis la Trapasejoj; kaj de tie dek pluaj ĝis la pordo de Isengardo. Sed ni ne rajdos la tutan vojon hodiaŭ nokte.

— Kaj kiam ni alvenos tien, kion ni vidos? — demandis Gimlio. — Vi eble scias, sed mi ne povas konjekti.

— Mi mem ne scias certe, — respondis la sorĉisto. — Mi estis tie hieraŭ je la noktiĝo, sed eble okazis multo depost tiam. Tamen mi opinias, ke vi ne taksos la vojaĝon vana — eĉ ne kvankam la briletaj Kavernoj de Aglarondo estas postlasitaj.

Finfine la trupo elpasis el la arbaro kaj konstatis, ke ili venis ĝis la fundo de la altaĵo, kie la vojo el Profundaĵo de Helmo disduiĝis: unuvoje orienten al Edoraso, alivoje norden al la Travadejoj de Iseno. Kiam ili rajdis el sub la arborando Legolaso haltis kaj bedaŭre rerigardis. Tiam li eligis subitan ekkrion:

— Troviĝas okuloj! Okuloj elrigardas el la ombroj de la branĉoj! Mi neniam antaŭe vidis tiajn okulojn.

La aliaj, surprizitaj de lia krio, haltis kaj turniĝis; sed Legolaso komencis retrorajdi.

— Ne, ne! — kriis Gimlio. — Faru laŭplaĉe en via frenezeco, sed unue lasu min elseliĝi! Neniajn okulojn mi volas vidi!

— Restu, Legolaso Verdfolio! — diris Gandalfo. — Ne reiru en la arbaron. Ankoraŭ ne! Nun ne estas via tempo.

Ĝuste dum li parolis, venis antaŭen el inter la arboj tri strangaj figuroj. Tiel altaj kiel troloj ili estis, dek du futojn aŭ pli ilia alto; iliaj fortaj korpoj, fortikaj kiel junaj arboj, ŝajnis vestitaj per robo aŭ felo el dense alĝustigitaj grizo kaj bruno. Iliaj membroj estis longaj, kaj iliaj manoj estis multfingraj; iliaj haroj estis rigidaj kaj iliaj barboj estis muskece grizverdaj. Ili elrigardis per okuloj gravmienaj, sed ne la rajdistojn ili rigardis; iliaj okuloj turniĝis norden. Subite ili levis siajn longajn manojn al la buŝoj kaj eligis sonorajn kriojn, klarajn kiel notoj de korno, sed pli muzikaj kaj variaj. La krioj estis responditaj; kaj returniĝinte la rajdistoj vidis pliajn kreaĵojn samspecajn proksiraiĝi, paŝantajn tra la herbo. Ili venis rapide el la nordo, paŝante simile al vadantaj ardeoj, sed ne samrapide; ĉar la longpaŝaj kruroj taktis pli rapide ol ardeaj flugiloj. La rajdistoj pro miro laŭte ekkriis, kaj kelkaj metis manon al siaj glavteniloj.

— Armilojn vi ne bezonas, — diris Gandalfo. — Tiuj estas nuraj paŝtistoj, efektive ili tute ne interesiĝas pri ni.

Ŝajnis esti tiel; ĉar dum li parolis, la altuloj sen ekrigardo al la rajdistoj enpaŝis la arbaron kaj malaperis.

— Paŝtistoj! — diris Teodeno. — Kie estas iliaj gregoj? Kio ili estas, Gandalfo? Ĉar estas klare, ke almenaŭ al vi ili ne estas nekonataj.

— Ili estas paŝtistoj de la arboj, — respondis Gandalfo. — Ĉu pasis tiom da tempo, de kiam vi aŭskultis rakontojn apudfajruje? Troviĝas en via

lando infanoj, kiuj el torditaj rakontofadenoj scius elpinĉi la respondon al via demando. Entojn vi ĵus vidis, ho reĝo, entojn el la Fangorna Arbarego, kiun vialingve oni nomas la Entarbaro. Ĉu vi supozis tiun nomon donita nur pro sencela fantazio? Ne, Teodeno, estas alie: por ili vi estas nur la pasema historio; ĉiuj jaroj de Eorlo la Juna ĝis Teodeno la Maljuna malmulte kalkuliĝas por ili; kaj ĉiuj faroj de via domo estas negrava afero.

La reĝo silentis.

— Entoj! — li diris finfine. — El la ombroj de legendo mi komencas iomete kompreni la mirindaĵon de l' arboj, ŝajnas al mi. Mi ĝisvivis tagojn strangajn. Jam longe ni paŝtigis niajn bestojn kaj kultivis niajn kampojn, konstruis niajn domojn, faris niajn laborilojn, aŭ forrajdis por helpi pri la militoj de Minaso Tirit. Kaj tion ni nomis la vivo de l' homoj, la moraro de la mondo. Nin malmulte koncernis tio, kio ekzistis ekster la limoj de nia lando. Kantojn ni havas, kiuj pritraktas tiajn aferojn, sed tiujn ni forgesas, instruante ilin nur al infanoj laŭ malzorga kutimo. Kaj nun descendis la kantoj inter nin el strangaj lokoj kaj iras videblaj sub la suno.

— Vi devus ĝoji, reĝo Teodeno, — diris Gandalfo. — Ĉar ne nur la eta vivo de la homoj estas nun endanĝerigita, sed ankaŭ la vivo de tiuj kreaĵoj, kiujn vi supozis legenda afero. Vi ne malhavas aliancanojn, eĉ se tiujn vi ne konas.

— Tamen mi devus ankaŭ tristi, — diris Teodeno. — Ĉar kiel ajn rezultiĝos la milita fortuno, ĉu ĝi eble ne tiel finiĝos, ke multo antaŭe bela kaj miriga, jam por ĉiam forpasos el Mez-Tero?

— Povas esti, — diris Gandalfo. — La malvirto de Saŭrono ne povas esti komplete rebonigita, nek farita kvazaŭ neniam estinta. Sed al tiaj tagoj ni estas kondamnitaj. Ni nun daŭrigu la komencitan vojaĝon!

La trupo tiam forturniĝis de la plataĵo kaj de la arbaro kaj sekvis la vojon direkte al la Travadejoj. Legolaso sekvis malvolonte. La suno estis for, jam sinkinta malantaŭ la randon de la mondo, sed kiam ili elrajdis el la ombro de la montetoj kaj rigardis okcidenten al Breĉo de Rohano la ĉielo ankoraŭ ruĝis, kaj sub la flosantaj nuboj estis brulanta lumo. Malhelaj kontraŭ ĝi fluge rondiris multaj nigrafluĝilaj birdoj. Iuj preterpasis supre kun mornaj krioj, reirante al siaj hejmoj inter la rokoj.

— La karnomanĝantoj okupiĝis en la batalkampo, — diris Eomero. Ili nun rajdis malurĝe, kaj mallumo volvis ĉirkaŭ ili la ebenaĵon.

La lanta luno supreniris, jam kreskinta al la pleno, kaj en ties frida arĝenta lumo la ŝvelaj herbejoj leviĝis kaj falis kvazaŭ larĝa griza maro. Ili rajdis proksimume kvar horojn ekde la voja disduiĝo kiam ili proksimiĝis al la Travadejoj. Longaj deklivoj descendis rapide ĝis kie la rivero larĝiĝis en ŝtonozaj malprofundaĵoj inter altaj herbaj terasoj. Portatan per la vento ili

aŭdis ululadon de lupoj. Iliaj koroj estis pezaj pro memoro pri la multaj homoj, kiuj batalpereis ĉi-loke.

La vojo subeniris inter supreniĝaj torfaroj, tranĉe penetrante la terasojn ĝis rando de l' rivero kaj denove supren aliflanke. Troviĝis tri vicoj da plataj pasoŝtonoj tra la fluo, kaj inter ili vadejoj por ĉevaloj, kiuj kondukis de ambaŭ randoj ĝis meza insuleto. La rajdistoj rigardis suben al la transirejoj, kaj ŝajnis al ili strange; ĉar la Travadejoj ĉiam estis loko plena je rapido kaj babilo de transŝtona akvo; sed nun ili estis silentaj. La fundoj de la rivereto estis preskaŭ sekaj, nuda dezertejo el rulŝtonetoj kaj griza sablo.

— Ĝi jam iĝis loko senĝoja, — diris Eomero. — Kia malsano trafis la riveron? Multajn belaĵojn detruis Sarumano: ĉu li ankaŭ voris la fontojn de Iseno?

— Ŝajnas, ke jes, — diris Gandalfo.

— Ve! — diris Teodeno. — Ĉu ni devas iri ĉi-voje, kie la karnomanĝantoj voras tiom da bravaj rajdistoj el Markio?

— Ĝi estas nia vojo, — diris Gandalfo. — Plorinda estas la pereo de viaj viroj; sed vi vidos almenaŭ ke la montaraj lupoj ne voras ilin. Per siaj amikoj, la orkoj, ili aranĝas sian feston: tia fakte estas la amikeco de ilia specio. Venu!

Ili descendis al la rivero, kaj kiam ili venis, la lupoj ĉesigis sian ululadon kaj forŝteliĝis. Timo trafis ilin, kiam ili vidis Gandalfon en la lunlumo kaj lian ĉevalon Ombrofakso brilanta kiel arĝento. La rajdistoj transpasis ĝis la insuleto, kaj ekbrilaj okuloj rigardis ilin pale el la ombroj de la bordoj.

— Vidu! — diris Gandalfo. — Ĉi tie laboris amikoj.

Kaj ili vidis, ke meze de la insuleto estis teramaso ĉirkaŭita per ŝtonoj kaj ĉirkaŭfermita per multaj lancoj.

— Ĉi tie kuŝas ĉiuj viroj de Markio, kiuj pereis apude, — diris Gandalfo.

— Ĉi tie ili ripozu! — diris Eomero. — Kaj kiam iliaj lancoj estos putrintaj kaj rustiĝintaj, ilia teramaso longe staru gardante la Travadejojn de Iseno!

— Ĉu tiu ĉi faro ankaŭ estas via, Gandalfo mia amiko? — demandis Teodeno. — Vi multon plenumis dum unu vespero kaj unu nokto!

— Per helpo de Ombrofakso... kaj de aliaj, — diris Gandalfo. — Mi rajdis fore kaj longe. Sed ĉi tie apud la teramaso mi volas diri jenon por via konsolo: multaj pereis dum la bataloj ĉe la Travadejoj, sed malpli ol onidiroj kalkulis. Pli multaj estis disigitaj ol mortigitaj; mi kunigis ĉiujn, kiujn mi sukcesis trovi. Iujn mi sendis kun Grimboldo el Ŭestfaldo aliĝe al Erkenbrando; iujn mi ordonis al tiu ĉi laboro kiun vi vidas, kaj tiuj jam reiris kape kun via marŝalo Elfhelmo al Edoraso. Ankaŭ multajn aliajn mi pli frue

sendis tien por gardi vian domon. Mi sciis, ke Sarumano sendis kontraŭ vin sian tutan forton, kaj liaj servantoj deviis de ĉiuj ceteraj taskoj kaj iris al la Profundaĵo de Helmo; la landoj ŝajnis malplenaj de malamikoj; tamen mi timis, ke luprajdistoj kaj kaperistoj malgraŭ tio rajdos al Meduseldo, dum ĝi estas nedefendata. Sed jam laŭ mia opinio ne necesas, ke vi timu! Vi trovos vian domon bonveniganta vian revenon.

— Kaj ĝoja mi estos revidante ĝin, — diris Teodeno, — kvankam jam mallonga estos mia restado tie, sendube.

Tiam la trupo adiaŭis la insuleton kaj la teramason, kaj transiris la riveron kaj supreniris la kontraŭan bordon. Poste ili rajdis plu, feliĉaj ke ili forlasis la mornajn Travadejojn. Post ilia foriro reaŭdiĝis la ululado de la lupoj.

Ekzistis antikva ĉefvojo kondukanta de Isengardo al la Travadejoj. Dum kelka tempo ĝi akompanis la riveron, kurbiĝante apud ĝi orienten kaj poste norden; sed finfine ĝi forturniĝis kaj kondukis rekte al la pordego de Isengardo; kaj tiu troviĝis sub la montoflanko okcidente de la valo, dek ses mejlojn aŭ pli de ĝia elirejo. Tiun vojon ili sekvis, sed ili ne rajdis sur ĝi; ĉar la apuda tero estis firma kaj ebena, kovrita multmejle de mallonga resalta herbo. Ili rajdis jam pli rapide, kaj je noktomezo la Travadejoj estis je preskaŭ kvin leŭgoj malantaŭe. Tiam ili haltis, kompletigante la tiunoktan vojaĝon, ĉar la reĝo estis laca. Ili atingis la subon de la Nebulecaj Montoj, kaj la longaj brakoj de Nan Kuruniro etendiĝis suben renkonte al ili. Senluma kuŝis la valeto antaŭ ili, ĉar la luno jam pasis okcidenten kaj ties lumon kaŝis la montetoj. Sed el la profunda ombro de la valo leviĝis larĝa spiralo el fumo kaj vaporo; supreniĝante ĝi allogis la radiojn de l' sinkanta luno kaj disvastiĝis laŭ muaraj ondoj, nigraj kaj arĝentaj, sur la stelplena ĉielo.

— Kion vi opinias pri tio, Gandalfo? — demandis Aragorno. — Oni supozus, ke la tuta Sorĉista Valo brulas.

— Nuntempe ĉiam estas nebulaĵo super tiu valo, — diris Eomero: — sed mi neniam antaŭe vidis ion tian. Tiuj estas pli vaporoj ol fumoj. Sarumano pretigas ian demonaĵon por saluti nin. Eble li boligas la tutan akvon de Iseno kaj tial la rivero forsekiĝas.

— Eble tion li faras, — diris Gandalfo. — Morgaŭ ni ekscios, kion li ja faras. Nun ni ripozu iom, se ni povos.

Ili bivakis apud la fluejo de l' Isena rivero; ĝi estis ankoraŭ silenta kaj malplena. Kelkaj el ili dormis iomete. Sed malfrue en la nokto la sentineloj ekkriis, kaj ĉiuj vekiĝis. La luno estis for. Steloj brilis supre; sed super la tero rampis mallumo pli nigra ol la nokto. Ambaŭflanke de l' rivero ĝi ruliĝis al ili, irante norden.

— Restu kie vi estas! — diris Gandalfo. — Neniun armilon elingigu! Atendu! Kaj ĝi preterpasos vin.

Nebuleto ĉirkaŭvolvis ilin. Supre kelkaj steloj plu brilis malforte; sed ambaŭflanke leviĝis muroj el nepenetrebla morno; ili estis en mallarĝa koridoro inter moviĝantaj ombroturoj. Voĉojn ili aŭdis, flustrojn, ĝemojn kaj senfinan siblan suspiradon; la tero skuiĝis sube. Ŝajnis al ili longe, dum ili sidis kaj timis; sed finfine la mallumo kaj la rumoro pasis, kaj malaperis inter la brakojn de la monto.

En la sudo ĉe Kornburgo noktomeze la homoj aŭdis grandan bruon, kaj neniu riskis eliri. Sed matene ili eliris kaj estis mirigitaj; ĉar la mortigitaj orkoj estis for, kaj ankaŭ la arboj. Malproksime sube en la valo de la Profundaĵo la herbo estis depremita kaj trample brunigita, kvazaŭ gigantaj paŝtistoj tie paŝtintus gregojn da bovoj; sed unu mejlon sube de la ŝtonmuro, truego estis fosita en la tero, kaj sur ĝi ŝtonoj estis alte amasigitaj. La homoj kredis, ke la mortigitaj orkoj estis enterigitaj tie; sed ĉu tiuj kiuj fuĝis en la arbaron estis kun ili, neniu povis diri, ĉar neniu iam ajn metis piedon sur tiun ŝtonamason. La Morta Monteto oni poste nomis ĝin, kaj neniu herbo kreskis tie. Sed la strangaj arboj neniam plu estis viditaj en la Profunda Kavaĵo; ili reiris nokte kaj marŝis malproksimen ĝis la malhelaj montetoj de Fangorno. Tiel ili venĝis sin kontraŭ la orkoj.

La reĝo kaj lia trupo tiunokte ne plu dormis; sed neniun alian strangaĵon ili vidis kaj aŭdis, krom unu: la voĉo de l' apuda rivero subite vekiĝis. Okazis fluado de akvo rapidanta suben inter la ŝtonoj; kaj kiam tiu pasis, Iseno fluis kaj bobelis denove en sia fluejo, kiel ĝi kutimis.

Je tagiĝo ili pretigis sin pluiri. La lumo venis griza kaj pala, kaj ili ne vidis la leviĝon de la suno. La aero supre estis peze nebula, kaj fumaĵo kuŝis sur la ĉirkaŭa tero. Ili iris malrapide, rajdante jam sur la ĉefvojo. Tiu estis larĝa kaj malmola, kaj bone prizorgita. Malklare tra la nebulo videblis la longa montobrako leviĝanta maldekstre. Ili pasis en Nan Kuruniron, la Sorĉistan Valon. Ĝi estis valo ĉirkaŭmurita, aperta nur al la sudo. Iam ĝi estis bela kaj verda, kaj tra ĝi fluis Iseno, jam profunda kaj forta antaŭ ol trovi la ebenaĵon; ĉar ĝin nutris multaj fontoj kaj rojetoj inter la pluvumitaj montetoj, kaj ĉie ĉirkaŭe kuŝis agrabla fekunda tereno.

Ne plu estis tiel. Sub la muroj de Isengardo ankoraŭ estis akreoj kultivataj de la Sarumanaj sklavoj; sed la plejparto de la valo iĝis sovaĝejo el loloj kaj dornoj. Rubusoj etendiĝis sur la tero aŭ transgrimpinte sur veprejoj kreis hirtajn kavetojn kie loĝis bestetoj. Tie kreskis neniuj arboj; sed inter la mucidaj herboj plu videblis la bruligitaj kaj hakitaj stumpoj de antikvaj boskoj. Tiu estis tereno trista, nun silenta krom la ŝtona bruo de hastaj akvoj. Fumoj kaj vaporoj drivis morozanube kaj kaŭris en kavetoj. La

rajdistoj ne parolis. Multaj dubemis en la koro, scivolante ĝis kia mizera fino kondukas la vojaĝo. Post kiam ili rajdis kelkajn mejlojn, la vojo iĝis larĝa strato pavimita per grandaj plataj ŝtonoj kvadrataj kaj sperte almetitaj; neniu herbero vidiĝis ĉe ajna junto. Profundaj defluiloj plenaj je malrapida akvo subeniris ambaŭflanke. Alta pilastro subite baŭmis antaŭ ili. Ĝi estis nigra, kaj sur ĝi estis metita ŝtonego ĉizita kaj pentrita laŭ formo de longa blanka mano. Ties fingro indikis norden. Ili sciis, ke jam ne malproksime devas stari la pordo de Isengardo, kaj iliaj koroj estis pezaj; sed iliaj okuloj ne povis trapiki la nebuletojn antaŭe.

Sub la montobrako en la Sorĉista Valo dum nekalkuleblaj jaroj situis tiu antikva loko kiun la homoj nomas Isengardo. Parte ĝin formis la kreado de la montoj, sed grandiozajn laboraĵojn pratempe faris tie la homoj de Okcidentio, kaj longe loĝadis tie Sarumano kaj ne maldiligentis.

Jen estas ĝia fasono, dum superregis Sarumano, de multaj taksata la ĉefo de sorĉistoj. Granda ringmuro el ŝtono kvazaŭ turecaj klifoj elstaris el la ŝirmo de la montflanko, de kiu ĝi etendiĝis kaj poste revenis. Nur unu enirejon oni faris en ĝi, grandan arkaĵon elfositan en la suda muro. Tie tra la nigra rokaĵo tunelo longa estis elhakita, fermita ambaŭflanke per fortikaj pordegoj el fero. Ili estis tiel konstruitaj kaj pendigitaj sur la grandaj ĉarniroj, ŝtalaj fostoj enbatitaj en la vivan ŝtonon, ke malbaritajn oni povis movi ilin per malforta puŝo per la brakoj, senbrue. Tiu, kiu enpaŝis kaj finfine eliĝis el la eĥoplena tunelo, vidis ebenaĵon, grandan cirklon, iomete kavigitan kvazaŭ vasta malprofunda kuvo: mejlon ĝi mezuris de rando al rando. Iam ĝi estis verda kaj plena je aleoj kaj boskoj da fekundaj arboj, akvumitaj per rojoj fluantaj de la montoj en lagon. Sed tie kreskis neniu verdaĵo dum la lastaj tagoj de Sarumano. La vojojn pavimis slaboj, malhelaj kaj duraj; kaj apud ili anstataŭ arboj sinsekvis longaj linioj de pilastroj, iuj marmoraj, iuj kupraj aŭ feraj, kunligitaj per pezaj ĉenoj.

Multaj domoj estis, ĉambroj, haloj kaj koridoroj, elhakitaj kaj tunelitaj en la muroj internaflanke, tiel ke la tutan apertan cirklon alfrontis sennombraj fenestroj kaj malhelaj pordejoj. Miloj povis loĝi tie, laboristoj, servistoj, sklavoj kaj militistoj kun granda stoko de armiloj; lupojn oni manĝigis kaj enstaligis en profundaj bestejoj sube. Ankaŭ la ebenaĵo estis traborita kaj fosita. Ŝaktoj estis boritaj profunde en la teron; ties suprajn ekstremojn kovris malaltaj teramasoj kaj ŝtonaj domoj, tiel ke en lunlumo la Ringo de Isengardo aspektis kiel tombejo de malmortaj mortintoj. Ĉar la tero tremis. La ŝaktoj descendis laŭ multaj deklivoj kaj spiralaj ŝtuparoj ĝis kavernoj en la suba subo; tie Sarumano havis trezorejojn, konservejojn, armilejojn, forĝejojn kaj fornegojn. Feraj radoj senĉese turniĝadis tie kaj marteloj batsonis obtuze. Dumnokte plumaroj da vaporo eliĝis tra la

aperturoj, desube lumigitaj de lumo ruĝa, blua aŭ venene verda.

Al la centro ĉiuj vojoj direktiĝis inter siaj ĉenaroj. Tie staris turo mirinde formita. Ĝin konstruis la metiistoj en pratempo, kiuj glatigis la Ringon de Isengardo, kaj tamen ĝi ŝajnis aĵo ne farita per la lerto de la homoj, sed ŝirita el ostoj de la tero dum la antikva turmentado de la montetoj. Pinto kaj insulo el roko ĝi estis, nigra kaj glime dura: kvar fortikaj pilieroj el multflanka ŝtono estis velde unuigitaj, sed proksime al la supro ili malfermiĝis al gapaj kornoj, kies pinakloj akris kiel pintoj de lancoj, akreĝis kiel tranĉiloj. Inter tiuj estis mallarĝa spaco, kaj tie sur planko el polurita ŝtono, surskribita je strangaj signoj, oni povis stari je kvincent futoj super la ebenaĵo. Ĝi estis Ortanko, la citadelo de Sarumano, kies nomo havis (intence aŭ hazarde) duoblan signifon; ĉar en la elfa lingvo *ortank* signifas Monto Dentego, sed en la praa lingvo de Markio: Ruza Menso.

Loko forta kaj mirinda estis Isengardo, kaj longe ĝi estis bela; kaj tie iam loĝis gravaj mastroj, kuratoroj de Gondoro okcidente, kaj saĝuloj kiuj observis la stelojn. Sed Sarumano malrapide formis ĝin laŭ siaj ŝanceliĝaj celoj, kaj plibonigis ĝin laŭ sia supozo, estante trompita — ĉar ĉiuj artoj kaj subtilaj rimedoj, por kiuj li rezignis pri sia antaŭa saĝeco, kaj kiujn li trompite supozis propraj, nur venis el Mordoro; do tio kion li kreis estis nulaĵo, nur eta kopio, infana ludilo aŭ sklava flato, de tiu giganta fortikejo, armilejo, karcero, forno de granda potenco Baraduro, la Malhela Turego, kiu permesis neniun rivalon kaj priridis flatadon, atendante propran momenton, sekura en sia fiero kaj sia nemezurebla forto.

Tio estis la fortikejo de Sarumano laŭ onidira raporto; ĉar en memoro de la vivantoj la homoj el Rohano ne eniris ĝian pordon, krom eble kelkaj, ekzemple Vermlango, kiuj venis sekrete kaj sciigis al neniu, kion ili vidis.

Nun Gandalfo rajdis al la granda pilastro de la Mano kaj preterpasis ĝin; kaj kiam li faris tion, la mirigitaj rajdistoj vidis, ke la Mano jam ne aspektas blanka. Ĝi estis makulita kvazaŭ de sekiĝinta sango; kaj pli proksimen rigardante ili konstatis, ke ĝiaj ungoj estas ruĝaj. Senatente Gandalfo plu rajdis en la nebuleton, kaj malvolonte ili sekvis lin. Nun ĉirkaŭ ili, kvazaŭ okazus subita inundo, kuŝis larĝaj flakoj apud la ŝoseo, plenigante la kavaĵojn, kaj rojetoj defluis inter la ŝtonoj.

Finfine Gandalfo haltis kaj fingrovokis ilin; kaj ili alvenis kaj vidis, ke post li foriĝis la nebuletoj kaj brilis pala sunlumo. Jam pasis la tagmeza horo. Ili jam atingis la pordegon de Isengardo.

Sed la pordego kuŝis ĵetegita kaj tordita sur la tero. Kaj ĉie ĉirkaŭe ŝtono, fendita kaj diserigita en formo de sennombraj akrangulaj pecoj, estis diserigita foren aŭ amasigita ruine. Ankoraŭ staris la granda arkaĵo, sed ĝi nun malfermiĝis al senplafona abismo: la tunelo estis vidigita, kaj en la

klifsimilaj muroj ambaŭflanke estis elŝiritaj fendegoj kaj breĉoj; ties turoj estis polvigitaj. Se la Granda Maro kolere leviĝus kaj ŝtorme falus sur la montetojn, tio ne kaŭzus pli grandan ruiniĝon.

La antaŭa ringo estis plena je vaporanta akvo: bobela kaldrono, en kiu ondiĝis kaj flosis vrakaĵo el traboj kaj stangoj, kestoj kaj bareloj kaj rompitaj varoj. Torditaj kaj kliniĝantaj pilastroj levis siajn rompitajn pintojn super la inundo, sed ĉiuj vojoj estis dronigitaj. Malproksime, ŝajne duonvualite per ondumanta nubo, baŭmis la insula roko. Ankoraŭ malhela kaj alta, nerompita per la ŝtormo, staris la turego Ortanko. Palaj akvoj plaŭdis ĉirkaŭ ĝia subo.

La reĝo kaj ties tuta trupo sidis silentaj sur siaj ĉevaloj, mirante, konstatante, ke la potenco de Sarumano estas renversita; sed la kielon ili ne povis konjekti. Kaj nun ili turnis la rigardon al la arkaĵo kaj la ruinigita pordego. Tie ili vidis apude grandan rubamason; kaj subite ili konsciiĝis pri du etaj figuroj senzorge kuŝantaj sur ĝi, grize vestitaj, apenaŭ videblaj inter la ŝtonoj. Apud ili estis boteloj kaj bovloj kaj pletoj demetitaj, kvazaŭ ili ĵus bone manĝis kaj nun ripozis post la laboro. Unu ŝajnis dormanta; la alia kun krucmetitaj kruroj kaj brakoj postmetitaj al la kapo apogis sian dorson per rompita roko kaj sendis el la buŝo longajn striojn kaj etajn ringojn da fumo maldense blua.

Momente Teodeno, Eomero kaj ĉiuj viroj mire rigardadis ilin. El la tuta ruiniĝo de Isengardo tio ŝajnis al ili la plej stranga vidaĵo. Sed antaŭ ol la reĝo povis ekparoli, la eta fumspira figuro subite konsciiĝis pri ili, dum ili sidis tie silente je rando de la nebuleto. Li salte stariĝis. Li aspektis junule aŭ junulsimile, kvankam laŭ staturo nemulte pli ol duonhome alta; lia kapo kun bruna bukla hararo estis nekovrita, sed li estis vestita per vojaĝmakulita mantelo samkolora kaj samfasona kian portis la kunuloj de Gandalfo, kiam ili rajdis al Edoraso. Li tre malalten riverencis, metante manon al sia brusto. Poste, ŝajnante ne rimarki la sorĉiston kaj ties amikojn, li turnis sin al Eomero kaj la reĝo.

— Bonvenon, mastroj, al Isengardo! — li diris. — Ni estas la pordogardistoj. Gajadoko, filo de Saradoko, estas mia nomo. Kaj mia kunulo, kiu ve! cedis al laceco, — tiam li piedpuŝis la alian, — estas Peregrino, filo de Paladino, el la domo de Tjuko. Malproksima en la nordo estas nia hejmo. Mastro Sarumano estas interne; se ĉimomente li ne estus enfermita kun iu Vermlango, sendube li estus ĉi tie por bonvenigi tiel honorindajn gastojn.

— Sendube tiel! — ridis Gandalfo. — Kaj ĉu estis Saramano kiu ordonis, ke vi gardu lian damaĝitan pordegon kaj atendu la alvenon de gastoj, kiam vian atenton vi povus forturni de pletoj kaj boteloj?

— Ne, bona sinjoro, tiun aferon li forgesis, — respondis Gaja seriozmiene. — Li estas multe okupita. Niaj ordonoj venis de Arbobarbo, kiu transprenis prizorgon de Isengardo. Li ordonis, ke mi bonvenigu la Mastron de Rohano per konvenaj vortoj. Mi faris mian plejeblon.

— Kaj kio pri viaj kunuloj? Kio pri Legolaso kaj mi? — kriis Gimlio, ne povante sin reteni pli longe. — Friponoj, vi lanpiedaj kaj lankapaj forvagintoj! Belan persekuton vi trudis al ni! Ducent leŭgojn tra marĉoj kaj arbaro, batalo kaj morto, por elsavi vin! Kaj jen ni trovas vin bankedantaj kaj pigrumantaj — kaj fumantaj! Fumantaj! Kie vi akiris la pipherbon, kanajloj? Je martel' kaj amboso! Mi estas tiel ŝirita pro kolero kaj ĝojo, ke estos mirinde se mi ne krevos!

— Vi parolas ankaŭ mianome, Gimlio, — ridis Legolaso. — Tamen mi prefere sciiĝus, kiel ili akiris la vinon.

— Unu aferon vi ne trovis dum via persekutado, kaj tio estas pli trafa spriteco, — diris Grinĉjo malfermante unu okulon. — Jen vi trovas nin sur venka batalkampo inter la kaperaĵo de armeoj, kaj vi scivolas kiel ni akiris kelkajn merititajn konsolaĵojn!

— Ĉu merititajn? — diris Gimlio. — Tion mi ne kredas! La rajdistoj ridis.

— Ne dubeblas, ke ni ĉeestas renkontiĝon de karaj amikoj, — diris Teodeno. — Do tiuj estas la perditoj el via kunularo, Gandalfo, ĉu? La sorto de la tagoj estas pleniĝi je mirindaĵoj. Mijam vidis multajn, post kiam mi forlasis mian domon; kaj jen jam antaŭ miaj okuloj staras ankoraŭ unu el la popoloj legendaj. Ĉu tiuj ne estas la duonuloj, kiujn kelkaj inter ni nomas holbitloj?

— Hobitoj, mi petas, mastro, — diris Grinĉjo.

— Ĉu hobitoj? — diris Teodeno. — Via lingvo strange ŝanĝiĝis; sed la nomo sonas tiel ne maltaŭga. Hobitoj! Neniu raporto aŭdita de mi traktas juste la veron.

Gaja riverencis; kaj Grinĉjo stariĝis kaj profunde riverencis.

— Vi bonvolas, mastro; aŭ espereble mi rajtas tiel interpreti viajn vortojn, — li diris. — Kaj jen alia mirindaĵo! Mi vagis en multaj landoj post la forlaso de mia hejmo kaj mi neniam ĝis nun trovis popolon konantan iun ajn historion pri la hobitoj.

— Mia popolo antaŭ tre longe elvenis el la nordo, — diris Teodeno. — Sed mi ne trompos vin: ni konas neniujn rakontojn pri hobitoj. Inter ni estas dirate, ke nur tre malproksime, trans multaj montetoj kaj riveroj, estas duonula popolo loĝanta en truoj en sablodunoj. Sed mankas legendoj pri ties faroj, ĉar oni diras, ke ili faras malmulton, evitas vidiĝi al la homoj, ĉar ili kapablas malaperi palpebrum-rapide; kaj ili povas ŝanĝi siajn voĉojn por

simili la ĉirpadon de birdoj. Sed ŝajnas, ke pli estas direbla.

— Vere tiel estas, mastro, — diris Gaja.

— Ekzemple, — diris Teodeno, — mi ne aŭdis, ke ili sputas fumon el siaj buŝoj.

— Ne surprize, — respondis Gaja, — ĉar tio estas arto kiun ni praktikas dum ne pli ol kelkaj generacioj. Estis Toboldo Kornblovulo el Longfundo en la Sud-kvarono, kiu la unua kultivis la malfalsan pip-herbon en siaj ĝardenoj ĉirkaŭ la jaro 1070 laŭ nia datumo. Kiel maljuna Toĉjo akiris la plantaĵon...

— Vi ne komprenas vian endanĝeriĝon, Teodeno, — interrompis Gandalfo. — Tiuj hobitoj pretas sidi rande de ruino kaj diskuti la plezurojn de la manĝotablo, aŭ la bagatelajn agojn de siaj patroj, avoj, praavoj kaj gekuzoj ĝis la naŭa grado, se vi kuraĝigas ilin per troa pacienco. Iu alia tempo estus pli konvena por la historio de fumado. Kie estas Arbobarbo, Gaja?

— Fore ĉe la norda flanko, laŭ mia supozo. Li iris trovi trinkon — da pura akvo. La pli multaj aliaj entoj estas kun li, ankoraŭ farante sian laboron — jen tie. — Gaja gestis per sia mano al la vaporanta lago; kaj rigardante ili aŭdis foran murmuradon kaj klakadon, kvazaŭ lavango falus de la montflanko. Malproksime aŭdiĝis *hum-hum*, kvazaŭ de kornoj triumfe blovataj.

— Kaj ĉu do Ortanko estas sengarde lasita? — demandis Gandalfo.

— Estas la akvo, — diris Gaja. — Sed Rapidtrunko kaj kelkaj aliaj privaĉas ĝin. Ne ĉiuj ĉi fostoj kaj pilastroj sur la ebenaĵo estas starigitaj de Saramano. Rapidtrunko, mi opinias, estas apud la roko proksime al la ŝtupara subo.

— Jes, alta griza ento troviĝas tie, — diris Legolaso, — sed liaj brakoj apudas la flankojn kaj li staras senmova kiel pordofosto.

— Estas post la tagmezo, — diris Gandalfo, — kaj ni, almenaŭ, ne manĝis post la frumateno. Tamen mi volas laŭeble baldaŭ interparoli kun Arbobarbo. Ĉu li ne lasis por mi mesaĝon, aŭ ĉu pletoj kaj boteloj forpelis ĝin el via menso?

— Mesaĝon li postlasis, — diris Gaja, — kaj mi intencis diri ĝin, sed malhelpis min multaj aliaj demandoj. Mi devis diri ke, se la Mastro de Markio kaj Gandalfo rajdos ĝis la norda muro, ili tie trovos Arbobarbon, kaj li bonvenigos ilin. Mi rajtas aldoni, ke ili trovos ankaŭ plej altkvalitan nutraĵon tie, ĉar ĝin trovis kaj elektis viaj humilaj servantoj. — Li riverencis.

Gandalfo ridis:

— Jam pli bone! Nu, Teodeno, ĉu vi rajdos kun mi por trovi

Arbobarbon? Ni devas ĉirkaŭiri, sed ne estas malproksime. Kiam vi vidos Arbobarbon, vi lernos multon. Ĉar Arbobarbo estas Fangorno, la plej aĝa kaj ĉefa el la entoj, kaj interparole kun li vi aŭdos la parolon de la plej maljuna el ĉiuj vivantoj.

— Mi akompanos vin, — diris Teodeno. — Adiaŭ, miaj hobitoj! Ni renkontiĝu denove en mia domo! Tie vi sidos apud mi kaj rakontos al mi ĉion kion deziros viaj koroj: la farojn de viaj avoj ĝis la limoj de via kalkulo; kaj ni parolos ankaŭ pri Toboldo la Maljuna kaj ties plantaĵo-klero. Adiaŭ!

La hobitoj profunde riverencis.

— Do tiu estas la Reĝo de Rohano! — diris Grinĉjo subvoĉe. — Brava maljunulo! Tre ĝentila.

9

Rubo kaj forĵetaĵo

Gandalfo kaj la reĝa trapo forrajdis, turnante sin orienten por ĉirkaŭiri la ruinigitajn murojn de Isengardo. Sed Aragorno, Gimlio kaj Legolaso ne iris. Lasinte Arodon kaj Hasufelon vagi serĉante herbon, ili venis kaj sidiĝis apud la hobitoj.

— Nu, nu! Finiĝis la ĉasado kaj finfine ni rerenkontiĝas tie, kien neniu el ni iam supozis alveni, — diris Aragorno.

— Kaj nun kiam la gravuloj iris diskuti aferojn altnivelajn, — diris Legolaso, — la ĉasintoj povas eble ekscii la respondojn al siaj propraj rebusetoj. Ni spuris vin ĝis la arbaro, sed ekzistas ankoraŭ multaj aferoj pri kiuj mi ŝatus scii la veron.

— Kaj ekzistas ankaŭ multo, kion ni volas scii pri vi, — diris Gaja. — Kelkajn aferojn ni eksciis per Arbobarbo, la maljuna ento, sed tiom tute ne sufiĉas.

— Ĉio siatempe, — diris Legolaso. — Ni estis la ĉasantoj, kaj vi devus unue liveri historion pri vi mem.

— Aŭ due, — diris Gimlio. — Tio irus pli glate post manĝo. Mia kapo doloras min kaj estas post la tagmezo. Vi foririntoj povus reguligi la konton trovante por ni iom el la priparolita kaperaĵo. Manĝaĵo kaj trinkaĵo repagus iom el via ŝuldo al mi.

— Do vi ricevos ilin, — diris Grinĉjo. — Ĉu vi prenos ĝin ĉi tie, aŭ pli komforte en la restaĵo de l' gardistejo Sarumana — jen tie, sub la arkaĵo? Ni devus pikniki ĉi tie ekstere por gvati la vojon.

— Duongvati! — diris Gimlio. — Sed mi eniros neniun orkan domon, nek tuŝos orkan manĝaĵon aŭ ion ajn pripalpitan de ili.

— Tion ni ne postulus de vi, — diris Gaja. — Sufiĉas al ni orkoj por unu vivodaŭro. Sed multaj aliaj popoloj estis en Isengardo. Sarumano retenis sufiĉe da saĝo por ne fidi al siaj orkoj. Li havis homojn por gardi siajn pordojn; verŝajne iuj el la plej fidelaj servantoj. Ĉiuokaze ili estis favoritaj kaj ricevis bonan provianton.

— Kaj pip-herbon? — demandis Gimlio.

— Ŝajnas al mi, ke ne, — Gaja ridis. — Sed tio estas alia historio, kiu povas atendi ĝis post la tagmanĝo.

— Nu, ni iru tagmanĝi do! — diris la gnomo.

La hobitoj gvidis antaŭen; kaj ili pasis sub la arkaĵo kaj alvenis larĝan

pordon maldekstre, supre de ŝtuparo. Ĝi malfermiĝis rekte al granda ĉambro kun alia malpli granda pordo ĉe la fora ekstremo kaj kameno kaj fumtubo unuflanke. La ĉambro estis elhakita el la ŝtono; kaj certe ĝi iam estis malhela, ĉar ĝiaj fenestroj elrigardis nur en la tunelon. Sed lumo nun envenis tra la rompita tegmento. En la kameno brulis ligno.

— Mi bruligis iom da fajro, — diris Grinĉjo. — Ĝi plezurigis nin en la nebuloj. Malmultaj branĉofaskoj haveblis, kaj la pliparto de la trovitaj lignaĵoj estis malseka. Sed en la fumtubo estas forta trablovo; ĝi ŝajnis serpentumi supren tra la roko kaj feliĉe ĝi ne estas ŝtopita. Fajro utilas. Mi faros por vi iom da rostita pano. La pano aĝas tri aŭ kvar tagojn, bedaŭrinde.

Aragorno kaj liaj kunuloj sidiĝis ĉe la tablo kaj la hobitoj malaperis tra la interna pordo.

— Varĉambro tie kaj feliĉe super la inundo, — diris Grinĉjo kiam ili revenis ŝarĝitaj je pletoj, bovloj, tasoj, tranĉiloj kaj ĉiaspeca nutraĵo.

— Kaj ne necesas grimaci pri la provianto, Mastro Gimlio, — diris Gaja. — Tio ĉi ne estas orka fatraso, sed homnutraĵo, laŭ esprimo de Arbobarbo. Ĉu vi preferas vinon aŭ bieron? Barelo troviĝas tie interne — tre akceptinda. Kaj tio ĉi estas unuagrada porkaĵo salita. Aŭ mi povas tranĉi por vi kelkajn pecojn da lardo kaj tiujn rosti se vi volas. Mi bedaŭras, ke mankas verdaĵo: la liveroj estis iom interrompitaj lastatempe! Mi ne povas proponi ion poste krom butero kaj mielo por via pano. Ĉu vi kontentas?

— Vere jes, — diris Gimlio. — La ŝuldo estas multe reduktita. La triopo baldaŭ okupiĝis pri sia manĝaĵo; kaj la du hobitoj senĝene ekmanĝis la duan fojon.

— Ni devas imiti la gastojn, — ili diris.

— Vi tre ĝentilas hodiaŭ matene, — ridis Legolaso. — Sed eble, se ni ne alvenus, vi jam imitus denove unu la alian.

— Eble; kaj kial ne? — diris Grinĉjo. — Ni manĝis fiaĵon ĉe la orkoj kaj sufiĉe malmulte dum tagoj antaŭe. Ŝajnas longa tempo de kiam ni povis satmanĝi kontentige.

— ŝajnas ke tio ne malutilis al vi, — diris Aragorno. — Efektive vi aspektas impone bonsanaj.

— Jes, tio estas fakto, — diris Gimlio rigardante atente ilin trans la randon de sia kruĉo. — Vidu, via hararo estas duoble pli densa kaj bukla ol ĉe nia disiĝo; kaj mi ĵurus ke vi ambaŭ iom kreskis, se tio eblas al hobitoj viaaĝaj. Tiu Arbobarbo ĉiuokaze ne lasis vin malsataj.

— Tion li ne faris, — diris Gaja. — Sed entoj nur trinkas, kaj trinkaĵo ne sufiĉas por kontentigi. La pocioj de Arbobarbo eble nutras, sed oni sentas neceson pri io solida. Kaj eĉ *lembaso* ne malindas alternativojn.

— Vi trinkis la akvon de la entoj, ĉu? — diris Legolaso. — Ha, supozeble la okuloj de Gimlio ne trompas lin. Strangaj kantoj estis kantitaj pri la pocioj de Fangorno.

— Multaj strangaj historioj estas rakontitaj pri tiu lando, — diris Aragorno. — Mi neniam eniris tien. Ek, rakontu pli pri ĝi kaj pri la entoj!

— Entoj, — diris Grinĉjo, — entoj estas — nu ekzemple, entoj ĉiuj malsimilas inter si. Sed pri la okuloj, vidu, iliaj okuloj estas tre strangaj. — Li provis kelkajn malcertajn vortojn kiuj forvelkis al silento. — Nu bone, — li daŭrigis, — vi jam vidis kelkajn demalproksime — almenaŭ ili vidis vin kaj raportis, ke vi proksimiĝas — kaj multajn aliajn supozeble vi vidos antaŭ ol foriri de ĉi tie. Vi devos formi proprajn konceptojn.

— Nu, nu! — diris Gimlio. — Vi komencas rakonti ĉe la mezo. Mi ŝatus historion laŭordan, komence de tiu stranga tago, kiam nia kunuleco interrompiĝis.

— Tion vi ricevos, se disponiĝos sufiĉe da tempo, — diris Gaja. — Sed unue — se vi finmanĝis — plenŝtopu kaj fajrigu viajn pipojn. Kaj tiam dum kelka tempo ni povos ŝajnigi, ke ni ĉiuj reiris sekuraj al Brio aŭ Rivendelo. — Li aperigis etan ledan sakon tabakoplenan. — Ni havas amason da ĝi, — li diris; — kaj vi povos ĉiuj paki tiom, kiom vi volos, kiam ni ekvojaĝos. Ni plenumis iom da elakva savado hodiaŭ matene, Grinĉjo kaj mi. Multaj aferoj disflosas. Ĝuste Grinĉjo trovis du bareletojn, supozeble elflosintajn el iu kelo aŭ varejo. Kiam ni malfermis ilin, ni trovis ilin plenigitaj je tio ĉi: tiel bonkvalita pip-herbo kiel oni dezirus, kaj tute ne difektita.

Gimlio prenis iom kaj frotis ĝin inter la manplatoj kaj snufis ĝin.

— Ĝi sentiĝas bona kaj ĝi odoras bona, — li diris.

— Ĝi ja estas bona! — diris Gaja. — Kara Gimlio, ĝi estas Longfunda Folio! Vidiĝis la Kornblovulaj varmarkoj sur la bareletoj, kiel eble plej klare. Kiel ĝi alvenis ĉi tien, mi ne povas imagi. Por persona uzo de Saramano, mi supozas. Mi ne sciis, ke ĝi eksportiĝas tiel foren. Sed ĉu ĝi uzindas nun?

— Nepre, — diris Gimlio, — se kune mi disponus pipon. Ve, mi perdis la mian en Morio aŭ pli frue. Ĉu ne troviĝas pipo inter ĉiuj viaj kaperaĵoj?

— Bedaŭrinde ne, — diris Gaja. — Eĉ unu mi ne trovis, ankaŭ ne ĉi tie en la gardistejo. Sarumano rezervis al si tiun ĉi frandaĵon, verŝajne. Kaj laŭ mia opinio ne utilas frapi la pordon de Ortanko por peti de li pipon! Ni devos dividi la pipojn, kiel konvenas al bonaj amikoj en okazoj de neceso.

— Duonmomenton! — diris Grinĉjo. Metinte manon en la bruston de sia jako li eltiris etan malmolan saketon sur ŝnuro. — Mi portas unu-du trezorojn apud mia haŭto, tiel valorajn kiel Ringoj al mi. Jen unu: mia malnova ligna pipo. Kaj jen alia: pipo neuzita. Mi longe kunportis ĝin,

kvankam la kialon mi ne scias. Mi vere neniam atendis pip-herbon dum la vojaĝo post elĉerpiĝo de mia stoko. Sed nun ĝi finfine utilas. — Li levis etan pipon kun larĝa platigita brulingo, kaj transdonis ĝin al Gimlio. — Ĉu tio nuligas la ŝuldon inter ni? — li diris.

— Ĉu nuligas? — ekkriis Gimlio. — Plej nobla hobito, tio profunde enŝuldigas min al vi.

— Nu, mi iras denove en la plenan aeron por vidi, kion faras la vento kaj la ĉielo! — diris Legolaso.

— Mi akompanos vin, — diris Aragorno.

Ili eliris kaj sidiĝis sur la amasigitajn ŝtonetojn antaŭ la pordejo. Ili povis jam vidi malproksimen en la valon; la nebuletoj leviĝis kaj forflosis laŭ venteto.

— Nun ni ripozu ĉi tie dum kelka tempo! — diris Aragorno. — Mi sidos rande de la ruino kaj parolos, kiel Gandalfo diras, dum li forestas okupate. — Li volvis sin per sia griza mantelo, kaŝante sian maŝkirason, kaj etendis siajn longajn krurojn. Poste li kliniĝis malantaŭen kaj blovis el siaj lipoj maldensan fumostrion.

— Vidu! — diris Grinĉjo. — Revenis Paŝegulo la disirulo!

— Li neniam forestis, — diris Aragorno. — Mi estas Paŝegulo kaj ankaŭ dunadano, kaj mi apartenas tiel al Gondoro kiel al la nordo.

Dum kelka tempo ili fumis silente, kaj la suno brilis al ili, oblikvante en la valon el inter blankaj nuboj alte en la okcidento. Legolaso kuŝis senmova, rigardante al la suno kaj ĉielo per la okuloj senŝancelaj kaj kantante mallaŭte al si. Fine li rektiĝis.

— Ek jam! — li diris. — Pasas la tempo, kaj la nebuletoj forbloviĝas, aŭ farus tion, se vi stranguloj ne volvus vin per fumo. Kio pri la historio?

— Nu, mia historio komenciĝas per vekiĝo en mallumo por konstati min tute ĉirkaŭligita en la orka bivako, — diris Grinĉjo. — Mi pripensu, kio estas hodiaŭ?

— La kvina de marto laŭ la Provinca kalkulo, — diris Aragorno. Grinĉjo iom kalkulis per la fingroj.

— Antaŭ nur naŭ tagoj! — li diris[9]. — Ŝajne pasis jaro post nia kaptiĝo. Nu, kvankam la duono similis koŝmaron, mi kalkulas ke sekvis tri tre teruraj tagoj. Gaja korektos min, se mi forgesos ion gravan: mi ne detaligos: la vipoj kaj la putraĵo kaj la fetoro kaj ĉio tia; ne tolereblas memori tion. — Dirinte tion li plonĝis en rakonton pri la lasta lukto de Boromiro kaj la orka marŝado de Emin Muilo ĝis la Arbarego. La aliaj kapjesis kiam la diversaj punktoj kompariĝis al iliaj supozoj.

— Jen kelkaj trezoroj, kiujn vi faligis, — diris Aragorno. — Ĝojigos vin rehavi ilin. — Li malligis sian zonon el sub la mantelo kaj elprenis la du

eningigitajn tranĉilojn.

— Nu! — diris Gaja. — Mi neniam atendis revidi tiujn! Mi cikatrigis kelkajn orkojn per la mia; sed Ugluko forprenis ilin de ni. Kiel li furioze rigardis nin! Komence mi pensis, ke li trapikos min, sed li forĵetis la aĵojn kvazaŭ ili brulumus lin.

— Kaj jen ankaŭ via broĉo, Grinĉjo, — diris Aragorno. — Mi tenis ĝin sekura, ĉar ĝi estas io tre valora.

— Mi scias, — diris Grinĉjo. — Estis malfacile rezigni pri ĝi, sed kion alian mi povis fari?

— Nenion alian, — respondis Aragorno. — Tiu kiu ne kapablas forĵeti trezoron, kiam necesas, estas katenita. Vi agis ĝuste.

— Tranĉo de la manradikaj ligiloj, tio estis lerta faro! — diris Gimlio. — Bonŝanco servis vin tiam; sed vi kaptis la okazon ambaŭmane, oni povus diri.

— Kaj starigis al ni belan problemon, — diris Legolaso. — Mi scivolis, ĉu vi kreskigis flugilojn!

— Bedaŭrinde ne, — diris Grinĉjo. — Sed vi ne sciis pri Griŝnaĥo. — Li ektremegis kaj diris nenion pli, lasante al Gaja rakonton pri tiuj lastaj teruraj momentoj: la palpantaj manoj, la varmega spiro kaj la terura forto de la harozaj brakoj de Griŝnaĥo.

— Ĉio ĉi pri la orkoj de Mordoro, aŭ Lugburzo laŭ ilia terminaro, maltrankviligas min, — diris Aragorno. — La Malluma Mastro jam sciis tro multe kaj ankaŭ liaj servistoj; kaj evidente Griŝnaĥo sendis trans la riveron ian mesaĝon post la kverelo. La Ruĝa Okulo nepre rigardas al Isengardo. Sed ĉiuokaze Sarumano estas en forka vergo propramane eltranĉita.

— Jes, kiu ajn partio venkos, lia antaŭvido malfavoras, — diris Gaja. — La aferoj komencis malfavori lin ekde la momento kiam liaj orkoj enpaŝis Rohanon.

— Ni ekvidis la maljunan kanajlon, aŭ tiel aludas Gandalfo, — diris Gimlio. — Rande de l’ Arbarego.

— Kiam okazis tio? — demandis Grinĉjo.

— Antaŭ kvin noktoj, — diris Aragorno.

— Ni kalkulu, — diris Gaja: — antaŭ kvin noktoj — nun ni alvenas parton de la historio, pri kiu vi scias nenion. Ni renkontis Arbobarbon tiumatene post la batalo; kaj tiunokte ni estis en Putohalo, unu el liaj entaj domoj. La postan matenon ni iris al Entmuteo, tio estas renkontiĝo de entoj, kaj afero la plej stranga, kiun mi vidis dumvive. Ĝi daŭris tiun tutan tagon kaj la postan; kaj ni pasigis la nokton ĉe ento nomita Rapidtrunkto. Kaj frue en la posttagmezo de la dua tago la entoj subite eksplodis. Estis mirige. La arbarego sentiĝis streĉa kvazaŭ prepariĝus en ĝi tondroŝtormo; poste ĝi

senaverte eksplodis. Mi volas ke vi aŭdu ties kanton dum la marŝo.

— Se Sarumano aŭdus ĝin, li jam troviĝus cent mejlojn for, eĉ se li devus utiligi la proprajn krurojn, — diris Grinĉjo.

Se Isengardo fortas, duras, ŝtone frida, oste dura,
ni militiras por ke pordon breĉu nia rompo truda!

Ĝi estis multe pli. Al granda parto de la kanto mankis vortoj kaj similis muzikon de kornoj kaj tamburoj. Ĝi estis tre ekscita. Sed mi supozis ĝin nur marŝmuziko kaj ne pli, nura kanto, ĝis ni alvenis la celon. Mi jam scias pli bone.

» Ni subiris trans la lastan firston en Nan Kuruniron post la noktiĝo, — Gaja daŭrigis. — Ĝuste tiam mi sentis unue, ke la arbarego mem moviĝas post ni. Mi supozis, ke mi spertas entan sonĝon, sed ankaŭ Grinĉjo rimarkis tion. Ni ambaŭ timiĝis; sed ni ne eltrovis pli pri tio ĝis poste.

» Tio estis la huornoj, aŭ tiel nomas ilin la entoj en la “kurta lingvaĵo”. Arbobarbo ne volas diri multon pri ili, sed mi opinias, ke ili estas entoj, kiuj preskaŭ arbiĝis, almenaŭ aspekte. Ili staras ie-tie en la arbaro aŭ sub ties randoj, silente, senĉese rigardante super la arboj; sed profunde en la valoj plej malhelaj troviĝas plurcentoj da ili, ŝajnas al mi.

» En ili estas granda potenco, kaj ili ŝajnas kapablaj volvi sin en ombroj; estas malfacile vidi ilin moviĝi. Sed ili moviĝas. Ili kapablas moviĝi tre rapide, se ili koleras. Oni staras senmove rigardante eble la veteron aŭ aŭskultante la sibladon de la vento, kaj poste vi subite konstatas, ke vi estas en la mezo de arbaro kun grandaj palpantaj arboj ĉie ĉirkaŭe. Ili havas ankoraŭ voĉojn kaj povas interparoli kun la entoj — pro tio oni nomas ilin huornoj, diras Arbobarbo — sed ili fariĝis strangaj kaj sovaĝaj. Danĝeraj. Mi teruriĝus renkontante ilin, se ne ĉeestus veraj entoj por prizorgi ilin.

» Nu, en la frua nokto ni ŝteliris suben laŭ longa ravino el la supra ekstremo de l’ Sorĉista Valo kun la entoj kaj ties susuraj huornoj malantaŭe. Ni ne povis vidi ilin kompreneble, sed la tuta aero plenplenis de grincado. Estis tre mallume en la nokto nubokovrita. Ili moviĝis rapidege tuj kiam ili forlasis la montetojn kaj faris bruon kiel forta vento. La luno ne aperis tra la nuboj, kaj ne longe post la noktomezo troviĝis alta arbaro ĉie ĉirkaŭ la norda flanko de Isengardo. Mankis indikoj pri malamikoj kaj ajna defio. Vidiĝis lumo glimanta tra alta fenestro en la turo, jen ĉio.

» Arbobarbo kaj kelkaj aliaj entoj ŝteliris antaŭen, ĉirkaŭire ĝis viddistanco de l’ grandega pordego. Grinĉjo kaj mi akompanis lin. Ni sidis sur la ŝultroj de Arbobarbo, kaj mi povis senti en li treman streĉitecon. Sed eĉ kiam ili agitiĝas, entoj povas agi tre singarde kaj pacience. Ili staris senmovaj kiel ĉizitaj ŝtonoj, spirante kaj aŭskultante.

» Tiam subite okazis grandega tumulto. Trumpetoj blekis kaj la muroj de Isengardo eĥis. Ni supozis nin rimarkitaj kaj ke komenciĝos batalo. Sed tute ne. La tuta popolo de Sarumano formarŝis. Mi ne scias multon pri tiu ĉi milito, nek pri la rajdistoj el Rohano, sed ŝajnas ke Sarumano intencis detrui la reĝon kaj ties tutan armeon unufrape. Li malplenigis Isengardon. Mi vidis la malamikojn foriri: senfinaj vicoj da marŝantaj orkoj; kaj trupoj da ili rajdantaj sur lupegoj. Kaj estis ankaŭ batalionoj da homoj. Multaj el ili portis torĉojn, kaj per la flagrado mi povis vidi la vizaĝojn. La plimultaj estis ordinaruloj, sufiĉe altaj kaj malblondharaj, severaj sed ne aparte malvirtaspektaj. Sed troviĝis iuj aliaj kiuj estis hidaj: home altaj sed kun goblenaj vizaĝoj, flavpalaj, rikanaj, strabaj. Ĉu vi scias, ili tuj memorigis min pri tiu sudano en Brio; nur ke li ne estis tiel evidente orksimila kiel la plimulto el ĉi tie.

— Ankaŭ mi pensis pri li, — diris Aragorno. — Ni devis trakti multajn el tiuj duonorkoj ĉe la Profundaĵo de Helmo. Ŝajnas jam klare, ke tiu sudano estis spiono de Sarumano; sed mi ne scias, ĉu li agis kune kun la Nigraj Rajdantoj, aŭ nur por Sarumano. Estas malfacile ĉe tiuj malvirtuloj scii, kiam ili kunlaboras, kaj kiam ili trompas unu la alian.

— Nu, da ĉiuj specoj kune estis minimume dek mil, — diris Gaja. — Ili bezonis horon por trapasi la pordegon. Iuj foriris laŭ la ĉefvojo al la Travadejoj, kaj iuj turniĝis orienten. Ponto estas konstruita tie, proksimume unu mejlon for, kie la rivero fluas en kanelo tre profunda. Vi povus nun vidi ĝin se vi stariĝus. Ili ĉiuj kantis raŭkvoĉe kaj ridis, kaŭzante hidan bruon. Al mi ŝajnis, ke la estonteco por Rohano estas tre sombra. Sed Arbobarbo ne moviĝis. Li diris: “Mia afero ĉi-nokte koncernas Isengardon, rokojn kaj ŝtonojn”.

» Sed, kvankam mi ne povis vidi kio okazas en la mallumo, mi opinias, ke huornoj komencis moviĝi suden tuj kiam la pordego refermiĝis. Ilin koncernis la orkoj, ŝajnas al mi. Matene ili troviĝis en la fora valo; aŭ ĉiuokaze estis tie ombro tra kiu oni ne povis vidi.

» Tuj post kiam Sarumano forsendis sian armeon, venis nia vico. Arbobarbo demetis nin, aliris la pordegon kaj komencis frapadi ĝin, alvokante Sarumanon. Malestis respondo, krom sagoj kaj ŝtonoj de la muroj. Sed sagoj estas senutilaj kontraŭ entoj. Ili doloras, kompreneble, kaj furiozigas ilin: kiel pikaj muŝoj. Sed ento povas esti tiel komplete sagopikita kiel pinglokuseneto kaj ne vundiĝi grave. Ekzemple, oni ne povas veneni ilin; kaj ilia haŭto ŝajnas tre dika kaj pli fortika ol arboŝelo. Necesas tre peza hakilbato por grave vundi ilin. Ili ne ŝatas hakilojn. Sed necesus tre multaj hakistoj kontraŭ unuopa ento: homo kiu unufoje hakas al ento neniam havas okazon bati duan fojon. Entpugna bato ĉifas feron kvazaŭ maldikan ladon.

» Kiam en Arbobarbo jam estis kelkaj sagoj, li komencis ardiĝi, fariĝi pozitive “hasta”, kiel li dirus tion. Li eligis laŭtegan *hum-hom*, kaj dekduo da aliaj entoj alpaŝis. Ento kolera teruras. Ties man- kaj piedfingroj simple kroĉiĝas al roko, kaj ili disŝiras ĝin kvazaŭ pankruston. Tio similis rigardi centjaran laboron de grandaj arboradikoj enpakitan en kelkajn momentojn.

» Ili ŝovis, trenis, ŝiris, skuis kaj martelis; kaj *pum-frap, krak-klak*, post kvin minutoj ili simple lasis tiun pordegon kuŝanta ruinigite; kaj kelkaj jam komencis mordi en la murojn kvazaŭ kunikloj en sablejo. Mi ne scias, kiel Sarumano interpretis la okazaĵon; sed ĉiuokaze li ne sciis, kiel trakti ĝin. Lia sorĉivo eble velkis lastatempe, kompreneble; sed ĉiuokaze ŝajnas al mi, ke li havas malmulte da medolo, ne multe da ordinara kuraĝo, kiam sola en malfacila situacio sen amaso da sklavoj kaj maŝinoj kaj tiaĵoj, se vi komprenas min. Tre malsimile al maljuna Gandalfo. Mi scivolas, ĉu lia famo ne ĉiam devenis grandparte de lia lerto enloĝiĝi en Isengardo.

— Ne, — diris Aragorno. — Iam li estis tiel grandioza kiel lia famo. Lia klero estis profunda, li pensis subtile, kaj liaj manoj estis mirinde lertaj; kaj li povis regi la mensojn de aliuloj. Saĝulojn li sciis persvadi, kaj pli malgravajn homojn li sciis timigi. Tiun kapablon li certe retenas. Ne troviĝas multaj en Mez-Tero kiujn mi taksus sekuraj se ili unuope devus interparoli kun li, eĉ nun kiam li spertis malvenkon. Gandalfo, Elrondo kaj Galadriela, eble, nun kiam lia malvirto estas malkaŝita, sed tre malmultaj aliaj.

— La entoj estas sekuraj, — diris Grinĉjo. — Ŝajnas ke li iam persvadis ilin, sed neniam plu. Kaj ĉiuokaze li ilin ne komprenis; kaj li kulpis grandan eraron, ke li neglektis ilin en sia kalkulado. Li ne havis planon kontraŭ ili, kaj mankis tempo por plani, kiam ili jam eklaboris. Tuj post komenciĝo de nia atako ĉiuj restantaj ratoj en Isengardo ekfuĝis tra ĉiu truo farita de la entoj. La entoj permesis al la homoj foriri, post kiam ili priesploris ilin, nur dudek-tridek el ili ĉe tiu ĉi ekstremo. Laŭ mia opinio ne multaj el la orka popolo, ĉu grandaj ĉu malgrandaj, eskapis. Ne de la huornoj: arbaro da ili ĝis tiam ĉirkaŭis Isengardon, krom tiuj, kiuj subeniris en la valon.

» Kiam la entoj rubigis grandan parton de la sudaj muroj, kaj la restaĵo de lia popolo fuĝis kaj dizertis, Sarumano forkuris panike. Ŝajnas ke li estis ĉe la pordo, kiam ni alvenis: atendeble li venis por spekti la formarŝon de sia grandioza armeo. Kiam la entoj trarompis, li haste foriris. Ili ne tuj rimarkis lin. Sed la nokto apertiĝis kaj vidiĝis forta stelolumo, tute sufiĉe por ke la entoj vidu, kaj subite puŝis krion Rapidtrunko: “La arbomortiginto! La arbomortiginto!” Rapidtrunko estas kreaĵo milda, sed li malamas Sarumanon tiom pli feroce pro tio, ke lia popolo kruele suferis pro la orkaj hakiloj. Li saltis de la interna pordo laŭ la pado, kaj li povas moviĝi

kiel vento kiam li estas agitita. Pala figuro videblis forrapidanta en kaj el la pilastraj ombroj, kaj ĝi preskaŭ alvenis la ŝtuparon al la turpordo. Sed estis preskaŭ-preskaŭe. Tiel arde postkuris lin Rapidtrunko, ke li nur dupaŝe evitis kaptiĝon kaj strangoliĝon antaŭ ol li englitis tra la pordo.

» Ne longe post kiam Sarumano denove sekuris en Ortanko li funkciigis iom el sia amata maŝinaro. Ĝis tiam troviĝis multaj entoj interne de Isengardo: iuj sekvis Rapidtrunkon, kaj aliaj eksplode eniĝis el la nordo kaj oriento; ili disvagis kaj kaŭzis multe da malutilo. Subite elleviĝis fajroj kaj haladzaj fumoj: la lukoj kaj ŝaktoj tra la tuta ebenaĵo komencis sputi kaj rukti. Pluraj entoj ekbrulis kaj vezikiĝis. Unu el ili, ŝajne lia nomo estis Fagosto, ento tre alta kaj bela, estis trafita de ŝpruco da ia likva fajro kaj brulis kvazaŭ torĉo: terura vidaĵo.

» Tio frenezigis ilin. Mi antaŭe supozis ilin vere agititaj; sed mi malpravis. Mi vidis finfine la realaĵon. Estis miregige. Ili blekis, bumis kaj trumpetis, ĝis ŝtonoj komencis fendiĝi kaj fali pro ties nura bruo. Gaja kaj mi kuŝis surtere kaj ŝtopis la orelojn per niaj manteloj. Ĉiam denove ĉirkaŭ la rokon de Ortanko la entoj paŝegis kaj ŝtormis kvazaŭ hurlanta tempesto, rompante pilastrojn, ĵetegante rokegojn en ŝaktojn, suprenpelante grandegajn ŝtonblokojn en la aeron kvazaŭ foliojn. La turego troviĝis meze de kirlovento. Mi vidis ferajn fostojn kaj blokojn da masonaĵo raketi plurcent futojn en la aeron kaj bategi la fenestrojn de Ortanko. Sed Arbobarbo restis prudenta. Feliĉe li estis neniom bruligita. Li deziris, ke lia popolo ne malutilu al si pro sia furiozo, kaj li deziris, ke Sarumano ne eskapu tra iu truo dum la konfuzeco. Multaj entoj ĵetadis sin kontraŭ la Ortankorokon; sed tiu venke kontraŭstaris. Ĝi estas tre glata kaj malmola. Eble troviĝas en ĝi ia sorĉaĵo, pli malnova kaj pli forta ol tiu de Saramano. Ĉiuokaze ili ne povis kroĉiĝi al ĝi, nek fendi ĝin; kaj ili sin kontuzis kaj vundis kontraŭ ĝi.

» Do Arbobarbo eliris en la ringon kaj kriegis. Lia fortega voĉo aŭdiĝis malgraŭ la granda bruo. Ekestis mortsilento subite. Dum ĝi ni aŭdis kriĉan ridadon el alta fenestro de la turego. Tio strange efikis al la entoj. Ili antaŭe bole eruptis; nun ili iĝis fridaj, glacie severaj kaj kvietaj. Ili forlasis la ebenaĵon kaj ĉirkaŭstaris Arbobarbon tute senmove. Li alparolis ilin dum kelka tempo sialingve; mi opinias, ke li sciigis al ili planon antaŭlonge elpensitan en lia maljuna kapo. Poste ili simple formalaperis silente tra la griza lumo. Tiam la tago jam aŭroris.

» Ili starigis vaĉon pri la turego, ŝajnas al mi, sed la vaĉantoj estis tiel kaŝitaj en ombroj kaj restis tiel senmovaj, ke mi ne povis vidi ilin. La ceteraj foriris norden. La tutan tagon ili estis okupataj, nevideble.

Tio estis tago morna; kaj ni ĉirkaŭvagis iom, kvankam ni evitis videblon

de la fenestroj de Ortanko tiom kiom ni povis: ili alrigardis nin tiel minace. Signifan parton de la tempo ni pasigis serĉante ion manĝeblan. Kaj ni ankaŭ sidis kaj interparolis, scivolante kio okazas forsude en Rohano, kaj kio okazis al la restaĵo de nia Kunularo. De tempo al tempo ni aŭdis en malproksimo la klakadon kaj faladon de ŝtonoj kaj obtuzan batbruon eĥantan inter la montetoj.

» Posttagmeze ni promenis ĉirkaŭ la cirklo, kaj iris rigardi la okazantaĵojn. Troviĝis granda ombreca arbaro da huornoj ĉe l' eniro de la valo kaj alia ĉirkaŭ la norda muro. Ni ne kuraĝis eniri. Sed aŭdiĝis interne rompa ŝira laborbruo. Entoj kaj huornoj fosadis grandajn putojn kaj tranĉeojn kaj kreis grandajn lagetojn kaj baraĵojn, kunigante ĉiujn akvojn de Iseno kaj ĉiu alia fonto kaj rojo, kiun ili trovis. Ni lasis ilin laborantaj.

» Je krepusko Arbobarbo revenis al la pordego. Li zumis kaj muĝis subvoĉe, kaj ŝajnis kontenta. Li staris etendante siajn brakegojn kaj kruregojn kaj spiris profunde. Mi demandis, ĉu li estas laca.

» — Ĉu laca? — li diris, — laca? Nu ne, ne laca, sed nefleksiĝema. Mi bezonas ampleksan trinkaĵon el Entvaŝo. Ni multe laboris; ni plenumis pli da ŝtonfendado kaj termaĉado hodiaŭ ol ni plenumis dum multaj longaj jaroj antaŭe. Sed ĝi preskaŭ kompletiĝis. Kiam noktiĝos, ne restadu proksime al tiu ĉi pordego aŭ en la malnova tunelo! Akvo eble trafluos, kaj tio estos dum kelka tempo akvo malpurega, ĝis la tuta fiaĵo de Sarumano estos forlavita. Poste Iseno povos flui denove pura. — Li komencis deŝiri iom pli da muro, laŭ malurĝa maniero, simple por sin distri.

» Ni ĝuste ekscivolis, kie estos sendanĝere kuŝi kaj iom dormi, kiam okazis la plej mirinda el ĉiuj okazaĵoj. Aŭdiĝis sono de rajdanto proksimiĝanta rapide sur la vojo. Gaja kaj mi kuŝis kviete, kaj Arbobarbo sin kaŝis en la ombroj sub la arkaĵo. Subite alpaŝegis granda ĉevalo, kvazaŭ ekflagro de arĝento. Ekmallumiĝis, sed mi povis vidi klare la vizaĝon de l' rajdanto: ĝi ŝajnis brila, kaj ĉiuj liaj vestaĵoj estis blankaj. Mi simple sidiĝis rekta, gapante kun la malfermita buŝo. Mi provis voki kaj ne sukcesis.

» Tio ne necesis. Li haltis ĝuste apud ni kaj subenrigardis. "Gandalfo!" — mi diris fine, sed mia voĉo nur flustris. Ĉu li diris: "Saluton, Grinĉjo! Jen agrabla surprizo!"? Ne, fakte! Li diris: "Stariĝu, idiota Tjuko! Kie, je l' kukolo, en tiu ĉi tuta ruinaĵo troviĝas Arbobarbo? Mi bezonas lin. Ek!"

» Arbobarbo aŭdis lian voĉon kaj tuj venis el la ombroj; kaj okazis stranga renkontiĝo. Mi surpriziĝis, ĉar neniu el ambaŭ ŝajnis entute surprizita. Gandalfo evidente atendis trovi Arbobarbon tie; kaj Arbobarbo preskaŭ ŝajnis ŝvebumanta apud la pordego ĝuste por renkonti lin. Tamen ni rakontis al la maljuna ento ĉion pri Morio. Sed poste mi memoris strangan rigardon, kiun li ĵetis al ni tiutempe. Supozeble li jam vidis Gandalfon aŭ

ricevis novaĵon pri li, sed ne volis tro rapide diri ion. “Ne hastu” — estas lia devizo; sed neniu, eĉ ne elfoj, povas multon diri pri la irado de Gandalfo, kiam li ne ĉeestas.

» — Hum! Gandalfo! — diris Arbobarbo. — Mi ĝojas, ke vi venis. Lignon kaj akvon, trunkon kaj rokon, tion mi scias pritrakti, sed ĉi tie sorĉisto estas traktenda.

» — Arbobarbo, — diris Gandalfo. — Necesas al mi via helpo. Vi plenumis multon, sed mi bezonas pli. Ĉirkaŭ dek mil orkojn mi devas pritrakti.

» Poste tiuj du foriris kaj interkonsiliĝis en iu angulo. Verŝajne ŝajnis al Arbobarbo tre haste, ĉar Gandalfo ege urĝiĝis kaj jam paroladis rapidege, antaŭ ol ili pasis for de aŭskultebleco. Ili forestis nur dum kelkaj minutoj, eble dum kvaronhoro. Poste Gandalfo revenis al ni, kaj li ŝajnis malŝarĝita, preskaŭ gaja. Tiam li efektive diris, ke li ĝojas revidi nin.

» — Sed Gandalfo, — mi ekkriis, — kie vi estadis? Kaj ĉu vi vidis la aliajn?

» — Kie ajn mi estis, mi jam revenis, — li respondis laŭ la malfalsa Gandalfa maniero. — Jes, mi vidis kelkajn el la aliaj. Sed sciigoj devas prokrastiĝi. Tiu ĉi estas nokto danĝeroplena, kaj mi devas rajdi rapide. Sed la aŭroro eble pli helos; kaj se jes ni renkontiĝos denove. Gardu vin, kaj restu for de Ortanko! Adiaŭ!

» Arbobarbo estis tre pensema post la foriro de Gandalfo. Li evidente eksciis multon dum mallonga tempo kaj tion analizis. Li rigardis nin kaj diris: “Hm, nu, mi konstatas, ke vi ne estas tiel hasta popolo kiel mi supozis. Vi diris multe malpli ol vi povis kaj ne pli ol vi devis. Hm, jen amaso da novaĵo sendube! Nu, jam devas Arbobarbo okupiĝi denove”.

» Antaŭ lia foriro ni sukcesis ellogi el li iomete pli da novaĵo; kaj tio tute ne ĝojigis nin. Sed intertempe ni pensis pli pri via triopo ol pri Frodo kaj Sam aŭ pri kompatinda Boromiro. Ĉar ni komprenis, ke granda batalo okazas, aŭ baldaŭ okazos, kaj ke vi partoprenas kaj eble neniam travivos ĝin.

» — Huornoj helpos, — diris Arbobarbo. Poste li foriris kaj ni ne revidis lin ĝis hodiaŭ matene.

» Estis profunde en la nokto. Ni kuŝis sur ŝtonamaso kaj nenion povis vidi post ĝi. Nebuleto aŭ ombroj estingis ĉion kvazaŭ granda lankovrilo ĉirkaŭ ni. La aero ŝajnis varmega kaj peza; kaj ĝi estis plena de susuroj, grincoj, kaj murmurado kvazaŭ de pasantaj voĉoj. Mi opinias, ke centoj da huornoj certe preterpasis por helpi dum la batalo. Poste aŭdiĝis granda muĝo de tondro en la fora sudo, kaj vidiĝis fulmoflagroj malproksime trans Rohano. De tempo al tempo ni povis vidi montopintojn en multmejla

malproksimo elpiki subite, nigre-blanke, kaj poste malaperi. Kaj malantaŭ ni aŭdiĝis tondrosimilaj bruoj en montoj, sed alispecaj. De tempo al tempo la tuta valo eĥadis.

» Verŝajne estis ĉirkaŭ noktomezo, kiam la entoj rompis la barilojn kaj verŝis la tutan kolektitan akvon tra breĉo en la norda muro, suben en Isengardon. La huorn-mallumo jam pasis, kaj la tondro jam forruliĝis. La luno sinkis malantaŭ la okcidentajn montojn.

» Isengardo komencis pleniĝi je nigraj rampantaj rojoj kaj lagetoj. Ili ekbrilis en la lasta lumo de la luno disvastiĝante sur la ebenaĵo. De tempo al tempo la akvoj trovis vojon malsupren en iun ŝakton aŭ sputotruon. Grandaj blankaj vaporoj siblis supren. Fumo leviĝis ondege. Okazis eksplodoj kaj fajroblovaĵoj. Unu granda vaporovolvaĵo kirliĝis supren, tordiĝante ĉiam denove ĉirkaŭ Ortankon, ĝis ĝi aspektis kvazaŭ alta nubomonteto sube arda kaj supre lunlumigita. Kaj ankoraŭ pli da akvo enverŝiĝis, ĝis fine Isengardo aspektis kiel granda plata pato tute vaporanta kaj bobelanta.

— Ni vidis nubon el fumo kaj vaporo el la sudo hieraŭ nokte, kiam ni alvenis la elirejon de Nan Kuruniro, — diris Aragorno. — Ni timis, ke Sarumano preparas ian novan demonaĵon por ni.

— Ne li! — diris Grinĉjo. — Li probable sufokiĝis kaj ne plu ridis. Ĝis la mateno, hieraŭa mateno, la akvo jam subensinkis en ĉiujn truojn kaj estiĝis densa nebulo. Ni ŝirmiĝis en la gardistejo; kaj ni spertis iom da timo. La lago komencis transbordiĝi kaj elverŝiĝi tra la malnova tunelo, kaj la akvo rapide leviĝis laŭ la ŝtuparo. Ni pensis, ke ni estas kaptotaj kiel orkoj en truo; sed ni trovis rondiran ŝtuparon fine de l' varĉambro kiu kondukis nin ĝis la supro de l' arkaĵo. La eliro estis stringa, ĉar la koridoroj estis rompitaj kaj duone baritaj per falintaj ŝtonoj apud la supro. Tie ni sidis alte super la inundo kaj spektis la droniĝon de Isengardo. La entoj daŭre enverŝis pli da akvo, ĝis ĉiuj fajroj estis estingitaj kaj ĉiuj kavernoj plenigitaj. La nebuloj malrapide kuniĝis kaj vaporis supren je ombrelego nuba: ĝi verŝajne altis unu mejlon. Vespere aperis ĉielarkego super la orientaj montetoj; kaj poste la sunsubiron kovris densa pluvetaĉo sur la montflankoj. Ĉio tre kvietiĝis. Kelkaj lupoj morne ululis en malproksimo. La entoj haltigis la enfluon dum la nokto, kaj resendis Isenon al ties antaŭa flupado. Kaj tiel finiĝis ĉio.

» Ekde tiam la akvo denove sinkadis. Devas esti ellasejoj ie el la subaj kavernoj laŭ mia opinio. Se Sarumano elgvatas el iu sia fenestro, tio devas aspekti malneta morna konfuzaĵo. Ni sentis nin tre solecaj. Eĉ ne videbla ento alparolebla en la tuta ruinaĵo; kaj mankis informoj. Ni pasigis la nokton tie super la arkaĵo, kaj tie estis fride kaj malsekete kaj ni ne dormis. Ni sentis ĉiumomente, ke povos okazi io ajn. Sarumano estas daŭre en sia

turego. Aŭdiĝis dum la nokto bruo, kvazaŭ vento alvenanta tra la valo. Mi opinias, ke la foririntaj entoj kaj huornoj tiam revenis; sed kien ili nun iris, tion mi ne scias. Estis mateno nebuleta malseketa, kiam ni subengrimpis kaj denove ĉirkaŭrigardis, kaj neniu vidiĝis. Kaj tio pli-malpli kompletigas la rakonton. Jam ŝajnas preskaŭ trankvile post la tuta tumulto. Kaj iel pli sekure, post la reveno de Gandalfo. Mi dormemas!

Ĉiuj silentis dum kelka tempo. Gimlio reŝtopis sian pipon.

— Pri unu afero mi scivolas, — li diris dum li fajrigis ĝin per siaj siliko kaj tindro: — Vermlango. Vi diris al Teodeno, ke li estas ĉe Sarumano. Kiel li atingis tien?

— Ho jes, pri li mi forgesis, — diris Grinĉjo. — Li ne atingis ĉi tien ĝis hodiaŭ matene. Ni ĝuste ekbruligis la fajron kaj iom manĝis, kiam reaperis Arbobarbo. Ni aŭdis lin zumi kaj voki niajn nomojn ekstere.

» — Mi venis nur por konstati, kiel vi fartas, knaboj, — li diris, — kaj por sciigi al vi kelkajn novaĵojn. Huornoj revenis. Ĉio enordas; jes, vere tre enordas! — li ridis kaj manfrapis siajn femurojn. — Ne plu orkoj en Isengardo, ne plu hakiloj! Kaj venos kelkaj personoj el la sudo antaŭ ol la tago maljuniĝos; iuj kiujn vi eble ĝojos vidi.

» Apenaŭ li diris tion, jam ni aŭdis sonon de hufbatoj sur la vojo. Ni elkuris antaŭ la pordegon, kaj mi staris fikse rigardante, duonatendante vidi Paŝegulon kaj Gandalfon rajdantajn antaŭ armeo. Sed el la nebulo elrajdis homo sur maljuna lacega ĉevalo; kaj li mem aspektis ia stranga tordita kreaĵo. Venis neniu alia. Kiam li elvenis el la nebulo kaj subite vidis antaŭ si la tutan ruinon kaj rompaĵon, li sidis gapante kaj lia vizaĝo iĝis preskaŭ verda. Li estis tiel konfuzita, ke komence li ŝajne ne rimarkis nin. Kiam li ekvidis nin, li elpuŝis krion, kaj provis turni sian ĉevalon kaj forrajdi. Sed Arbobarbo faris tri paŝojn, etendis longan brakon kaj levis lin de la selo. Lia ĉevalo forkuris terurite, kaj li kaŭris sur la tero. Li diris, ke li estas Grimo, amiko kaj konsilanto de la reĝo, kaj estis sendita kun gravaj mesaĝoj de Teodeno al Sarumano.

» — Neniu alia aŭdacus rajdi tra la neŝirmita lando tiom plena je fiaj orkoj, — li diris, — do oni sendis min. Kaj mi spertis vojaĝon danĝeroplenan kaj mi estas malsata kaj laca. Mi fuĝis tre norden for de mia vojo, persekutate de lupoj.

» Mi rimarkis la strabajn rigardojn, kiujn li direktis al Arbobarbo, kaj mi diris al mi: “mensogulo”. Arbobarbo rigardis lin laŭ sia longa lanta maniero dum kelkaj minutoj, ĝis la mizerulo tordiĝis sur la planko. Poste li diris finfine: “Ha, hm, mi atendis vin, mastro Vermlango. — Pro tiu nomo la viro eksaltetis. — Gandalfo pli frue alvenis ĉi tien. Do mi scias pri vi tiom, kiom mi bezonas, kaj mi scias kion fari pri vi. Metu ĉiujn ratojn en unu kaptilon,

diris Gandalfo; kaj tion mi faros. Nun mi estas la mastro de Isengardo, sed Sarumano estas enŝlosita en sia turego; kaj vi povos iri tien kaj transdoni al li ĉiujn mesaĝojn kiujn vi kapablas elpensi".

» — Permesu iri, permesu iri! — diris Vermlango. — Mi konas la vojon.

» — Ke vi konis la vojon, tion mi ne dubas, — diris Arbobarbo. — Sed ŝanĝiĝis iomete la aferoj ĉi tie. Iru vidi!

» Li permesis al Vermlango iri, kaj tiu lamiris tra la arkaĵo, dum ni lin sekvis, ĝis li venis internen de la ringo kaj povis vidi la inundon kuŝantan inter li kaj Ortanko. Tiam li sin turnis al ni.

» — Permesu, ke mi foriru! — li plorplendis. — Permesu, ke mi foriru! Miaj mesaĝoj jam senutilas.

» — Ili ja, — diris Arbobarbo. — Sed vi havas nur du elekteblecojn: resti kun mi ĝis venos Gandalfo kaj via mastro, aŭ transiri la akvon. Kiun vi elektas?

» La viro tremetis pro mencio pri sia mastro, kaj enakvigis piedon, sed li retropaŝis. "Mi ne scias naĝi", — li diris.

» — La akvo ne profundas, — diris Arbobarbo. — Ĝi ja malpuras, sed tio ne malutilos al vi, mastro Vermlango. Eniru jam!

» Tiam la mizerulo forplaŭdis en la inundon. Tiu leviĝis preskaŭ ĝis lia kolo antaŭ ol li tro malproksimis pro ke mi vidu lin. Mi laste vidis lin kroĉiĝanta al iu malnova barelo aŭ peco da ligno. Sed Arbobarbo vade sekvis lin kaj gvatis lian progreson.

» — Nu, li eniris, — li diris reveninte. — Mi vidis lin rampi laŭ la ŝtupoj supren kvazaŭ tramalseka rato. Ankoraŭ restas iu en la turego: mano etendiĝis kaj entrenis lin. Do tie li troviĝas, kaj mi esperas, ke la bonvenigo plaĉos al li. Nun mi devas iri purigi min de la ŝlimo. Mi estos fore ĉe la norda flanko, se iu deziros alparoli min. Ĉi tie ne troviĝas pura akvo taŭga por enta trinkaĵo aŭ sinbanado. Do junuloj, mi petas vin du gvati ĉe la pordo atende la venontojn. Ili inkluzivos la Mastron de l' Kampoj Rohanaj, atentu! Vi devos bonvenigi lin tiel taŭge kiel vi scipovas: lia sekvantaro travivis grandan batalon kontraŭ la orkoj. Eble vi scias la ĝustan homan vortformon por tia reĝo pli bone ol entoj. Dum mia vivo estis multaj reĝoj en la verdaj kampoj, kaj mi neniam lernis ties parolon aŭ ties nomojn. Ili deziros homnutraĵon kaj pri tio vi ĉion scias laŭ mia supozo. Do trovu tion, kio taŭgas kiel reĝa manĝaĵo, se vi povos. — Kaj tie finiĝis la historio. Tamen mi ŝatus scii, kiu estas tiu Vermlango. Ĉu li vere estis konsilanto de la reĝo?

— Tio li estis, — diris Aragorno; — kaj ankaŭ spiono kaj servisto de Sarumano en Rohano. La sorto ne traktis lin pli favore ol li meritis. Ekvidi la ruinon de ĉio, kion li supozis tiel fortika kaj admirinda, estis verŝajne

puno sufiĉa. Sed mi timas, ke atendas lin io eĉ pli malbona.

— Jes, mi ne supozas, ke Arbobarbo sendis lin al Ortanko pro bonkoreco, — diris Gaja. — Li ŝajnis iom severe ĝojigita de la afero, kaj private ridis, kiam li iris sin bani kaj trinki. Post tio ni estis tre okupataj, esplorante la rubojn kaj ĉirkaŭpalpe serĉante. Ni trovis dutri konservejojn en diversaj apudaj lokoj, super la nivelo de l' inundo. Sed Arbobarbo alsendis kelkajn entojn, kaj ili forportis sufiĉe multajn varojn.

» — Ni bezonas homnutraĵon por dudek kvin, — la entoj diris, do vi konstatas, ke iu zorge nombris vian aron antaŭ via alveno. Evidente via triopo laŭ la intenco devis akompani la gravulojn. Sed tie vi ne fartus pli bone. Ni retenis tiom bonkvalitajn, kiom ni sendis, mi promesas al vi. Eĉ pli bone, ni sendis neniom da trinkaĵo.

» — Kio pri trinkaĵoj? — mi diris al la entoj.

» — Troviĝas isena akvo, — ili diris, — kaj tio sufiĉas al entoj kaj homoj. — Sed espereble la entoj disponis tempon por brasi siajn pociojn el la montetaj fontoj, kaj ni vidos bukliĝi la barbon de Gandalfo, kiam li revenos. Post foriro de la entoj ni sentis nin lacaj kaj malsataj. Sed ni ne grumblis — niaj laboroj estis taŭge kompensitaj. Pro nia serĉado por homnutraĵo Grinĉjo malkovris la plej valoran el ĉiuj forĵetaĵoj, tiujn barelojn de Kornblovulo. "Pip-herbo plibonas postmanĝe", — diris Grinĉjo; tiel okazis la situacio.

— Mi jam perfekte komprenas ĉion, — diris Gimlio.

— Ĉion kun unu escepto, — diris Aragorno: — folioj el Sud-kvarono en Isengardo. Ju pli mi pripensas tion, des pli stranga mi trovas ĝin. Mi neniam antaŭe estis en Isengardo, sed mi vojaĝis en tiu ĉi lando, kaj mi bone konas la vakajn landojn kuŝantajn inter Rohano kaj la Provinco. Nek varoj nek personoj trapasis tiun regionon dum multaj longaj jaroj, ne malkaŝe. Sarumano sekrete traktis kun iu en la Provinco, konjekteble. Vermlangoj estas troveblaj en aliaj domoj krom tiu de la reĝo. Ĉu sur la bareloj estis dato?

— Jes, — diris Grinĉjo. — Tio estis rikoltaĵo de la jaro 1417, nome la pasinta jaro; ne, la jaro antaŭpasinta kompreneble jam: bona jaro.

— Aĥ do, jam finiĝis kia ajn misaĵo okazinta, espereble; aŭ ĉiuokaze ĝi estas aktuale ekster nia atingo, — diris Aragorno. — Tamen mi opinias, ke mi mencios tion al Gandalfo, eĉ se ĝi ŝajnas bagatelo inter liaj gravaj aferoj.

— Mi scivolas, kion li faras, — diris Gaja. — La posttagmezo progresas. Ni iru ĉirkaŭesplori! Vi povas jam eniri Isengardon ĉiuokaze, Paŝegulo, se tion vi volas. Sed ĝi estas vidaĵo ne tre gaja.

10

La voĉo de Sarumano

Ili trapasis la ruinigitan tunelon kaj staris sur ŝtonamaseto rigardante la malhelan rokon de Ortanko kaj ties multajn fenestrojn, ankoraŭ minacan en la dezerto ĉirkaŭanta ĝin. La akvo jam preskaŭ tute foriĝis. Ie-tie restis mornaj flakoj kovritaj de skorio kaj rompitaĵo; sed la plejparto de la larĝa cirklo estis denove nuda, sovaĝejo de ŝlimo kaj faligita rokaĵo, variolmarkita de nigrigitaj truoj kaj trapunktita de stangoj kaj pilastroj ebriece kliniĝantaj ien kaj tien. Rande de l' frakasita bovlo kuŝis grandaj deklivoj kaj amasiĝoj kiel rulŝtonetoj alpuŝitaj de ŝtormego; kaj malantaŭ ili la verda implikita valo etendiĝis en la longan ravinon inter la malhelaj brakoj de l' montaro. Trans la dezertejo ili vidis rajdantojn, kiuj serĉis vojon; tiuj venis de la norda flanko, kaj ili jam proksimiĝis al Ortanko.

— Jen Gandalfo, Teodeno kaj ties homoj! — diris Legolaso. — Ni iru renkonti ilin!

— Marŝu singarde! — diris Gaja. — Troviĝas lozaj slaboj, kiuj eble kliniĝos kaj subenĵetos vin en puton, se vi ne zorgemos.

Ili laŭiris la restaĵon de la vojo de la pordoj ĝis Ortanko, marŝante malrapide, ĉar la slaboj estis fendetitaj kaj ŝlimaj. La rajdantoj, vidante ilian proksimiĝon, haltis en ombro de la rokego kaj atendis ilin. Gandalfo rajdis antaŭen por renkonti ilin.

— Nu, Arbobarbo kaj mi havis kelkajn interesajn diskutojn kaj pretigis iujn planojn, — li diris; — kaj ni ĉiuj ĝuis iom da tre necesa ripozo. Nun ni jam devas pluiri. Mi esperas, ke vi, kunuloj, ankaŭ ĉiuj ripozis kaj freŝigis vin?

— Ni tion faris, — diris Gaja. — Sed niaj diskutoj komenciĝis kaj finiĝis en fumo. Tamen ni sentas nin malpli mishumoraj pri Sarumano ol pli frue.

— Ĉu vere? — diris Gandalfo. — Nu, tion ne sentas mi. Nun plenumendas lasta tasko de mi antaŭ ol mi foriros: mi devas adiaŭe viziti Sarumanon. Danĝere, kaj verŝajne senutile; sed estas farende. Kiu el vi volas, tiu rajtas akompani min — sed gardu vin! Kaj ne ŝercu! Por tio la tempo ne oportunas.

— Mi venos, — diris Gimlio. — Mi volas vidi lin kaj sciiĝi, ĉu li aspektas kiel vi.

— Kaj kiel vi tion ekscios, mastro Gnomo? — demandis Gandalfo.

— Sarumano kapablus aspekti kiel mi antaŭ viaj okuloj, se tio konvenus al lia celo rilate vin. Kaj ĉu vi estas jam sufiĉe saĝa por konstati ĉiujn liajn strasaĵojn? Nu, ni vidos, eble. Li eble hezitos montri sin antaŭ tiom da malsimilaj okuloj samtempe. Sed mi ordonis, ke ĉiuj entoj ekstervidigu sin, do eble ni persvados lin elveni.

— Kio minacas? — demandis Grinĉjo. — Ĉu li pafos kontraŭ nin aŭ verŝos fajron tra la fenestroj; aŭ ĉu li kapablas envulti nin de malproksime?

— Tiu lasta plej probablas, se vi alrajdos lian pordon kun la koro leĝera, — diris Gandalfo. — Sed ne antaŭvideblas tio, kion li kapablos, aŭ eble elektos provi. Sovaĝbesto barita ne alireblas senriske. Kaj Sarumano posedas potencon, kiun vi ne divenas. Gardu vin de lia voĉo!

Ili venis al la subo de Ortanko. Ĝi estis nigra, kaj la rokaĵo ekbrilis, kvazaŭ ĝi estus malseka. La multaj ŝtonfacoj havis akrajn eĝojn, kvazaŭ ili estus nove ĉizitaj. Kelkaj strekoj kaj pluraj floksimilaj splitaĵoj proksimaj al la bazo estis la solaj postsignoj pri la furiozo de la entoj.

Orientflanke, inter angulo de du pilieroj, troviĝis pordego alte super la tero; kaj super ĝi estis ŝutrokovrita fenestro kun balkono frontita per ferstangoj. Supren ĝis la sojlo de l' pordo kondukis dudek sep larĝaj ŝtupoj, hakitaj laŭ iu nekonata metiarto el la sama nigra ŝtono. Tio estis la unika enirejo al la turego; sed multaj altaj fenestroj estis eltranĉitaj kun profundaj embrazuroj en la altaj baŭmantaj muroj: tre alte ili gvatis kvazaŭ etaj okuloj sur la apikaj facoj de la kornoj.

Ĉe la subo de l' ŝtuparo Gandalfo kaj la reĝo elseliĝis.

— Mi supreniros, — diris Gandalfo. — Mi jam estis en Ortanko kaj mi konas la danĝeron.

— Ankaŭ mi supreniros, — diris la reĝo. — Mi estas maljuna kaj ne plu timas ajnan danĝeron. Mi deziras alparoli tiun malamikon, kiu tiom mistraktis min. Eomero akompanos min kaj certigos, ke miaj maljunaj piedoj ne stumblu.

— Laŭ via plaĉo, — diris Gandalfo. — Aragorno akompanos min.

La aliaj atendu min sube de la ŝtuparo. Ili aŭdos kaj vidos sufiĉe, se io aŭdindos aŭ vidindos.

— Ne! — diris Gimlio. — Legolaso kaj mi deziras vidi de pli proksime. Nur ni reprezentas ĉi tie niajn popolojn. Ankaŭ ni venos malantaŭe.

— Do venu! — diris Gandalfo kaj supreniris la ŝtuparon, kaj Teodeno iris kune.

La rajdistoj de Rohano sidis maltrankvile sur siaj ĉevaloj ambaŭflanke de l' ŝtuparo kaj morne rigardis la turegon, timante anticipe pri la sorto de sia mastro. Gaja kaj Grinĉjo sidis sur la ŝtupo plej malsupra, sentante sin tute negravaj kaj malsekuraj.

— Duona kota mejlo de ĉi tie ĝis la pordo! — murmuris Grinĉjo. — Se nur mi povus forŝteliĝi nerimarkite al la gardistejo! Kial ni alvenis? Oni ne volas nin.

Gandalfo staris antaŭ la pordo de Ortanko kaj batis ĝin per sia bastono. Ĝi resonoris kavece.

— Sarumano, Sarumano! — Gandalfo kriis per laŭte ordona voĉo. — Elvenu Sarumano!

Dum kelka tempo mankis respondo. Finfine malbariĝis la fenestro super la pordo, sed neniu figuro estis videbla ĉe ties malhela truo.

— Kiu estas? — diris voĉo. — Kion vi volas? Teodeno tremeris.

— Tiun voĉon mi konas, — li diris, — kaj mi malbenas la tagon, kiam mi la unuan fojon aŭskultis ĝin.

— Iru alvoki Sarumanon, tial ke vi iĝis ties lakeo, Grimo Vermlango! — diris Gandalfo. — Kaj ne malŝparu nian tempon!

La fenestro fermiĝis. Ili atendis. Subite ekparolis alia voĉo, malalta kaj melodia, ties sono mem envulta. Kiuj aŭskultis malsingarde tiun voĉon, tiuj malofte povis raporti la vortojn aŭskultitajn; kaj se jes, ili miris, ĉar malmulte da potenco restis en ili. Pleje oni memoris nur, ke estis agrable aŭskulti la parolantan voĉon, ĉio dirita ŝajnis saĝa kaj racia, kaj vekiĝis onia deziro laŭ tuja konsentemo ŝajni mem saĝaj. Kiam parolis aliaj, tiuj ŝajnis kontraste akraj kaj krudaj; kaj se oni kontraŭdiris la voĉon, kolero ĉendiĝis en la koroj de la envultitoj. Ĉe iuj la envulto daŭris nur dum parolis al ili la voĉo, kaj kiam ĝi alparolis aliulon, ili ridetis, kiel ridetas homoj, kiuj travidas trukon de ĵonglisto, dum aliaj gapas pro ĝi. Ĉe multaj la nura sono de la voĉo sufiĉis por sorĉi ilin; sed ĉe tiuj, kiujn ĝi venkis, la sorĉo daŭris kiam ili estis malproksimaj, kaj ĉiam ili aŭdis la flustradon kaj instigadon de tiu mallaŭta voĉo. Sed neniuj estis netuŝitaj; neniuj rifuzis sen streĉo de menso kaj volo ties pledojn kaj ordonojn, dum la mastro regis ĝin.

— Nu? — ĝi nun diris mildademande. — Kial necesas al vi perturbi mian ripozon? Ĉu vi tute ne lasos min trankvila dumtage aŭ nokte? — Ĝia tono estis kvazaŭ de bonfarema koro ĝenita de vundoj nemerititaj.

Ili suprenrigardis surprizite, ĉar ili aŭdis neniun sonon de lia alveno; kaj ili ekvidis figuron, kiu staris ĉe la barilo kaj rigardis al ili: maljunulo volvita en mantelego kies koloro estis malfacile konstatebla, ĉar ĝi ŝanĝiĝis se ili movis siajn okulojn aŭ se li ekmoviĝis. Lia vizaĝo estis longa, kun alta frunto, li havis okulojn profundajn kaj ombrecajn, malfacile sondeblajn, kvankam ties nuna esprimo estis serioza, bonkora kaj iom laca. Liaj haroj kaj barbo estis blankaj, sed eroj nigraj ankoraŭ montriĝis ĉirkaŭ liaj lipoj kaj oreloj.

— Similas, kaj tamen malsimilas, — murmuris Gimlio.

— Tamen vidu, — diris la mallaŭta voĉo. — Almenaŭ du el vi mi konas laŭnome. Gandalfon mi tro bone konas por multe esperi, ke ĉi tie li serĉas helpon aŭ konsilon. Sed vi, Teodeno, Mastro de lando Rohano, estas distingita per viaj nobelaj blazonoj, kaj eĉ pli per la honorinda aspekto de la domo Eorla. Ho, inda filo de Tengelo la Trioble Fama! Kial vi ne venis pli frue, kaj kiel amiko? Multe mi deziris vidi vin, plej potencan reĝon en la okcidento, kaj precipe dum la lastaj jaroj por savi vin de la nesaĝaj kaj misaj konsiloj vin afliktintaj! Ĉu jam tro malfrue? Malgraŭ la vundoj al mi kaŭzitaj, kiujn la homoj de Rohano, ve! partoprenis, mi tamen volas savi vin kaj vin protekti de la ruino, kiu neeviteble proksimiĝas, se vi plu rajdos laŭ la vojo, kiun vi entreprenis. Efektive jam nur mi kapablas helpi vin.

Teodeno malfermis sian buŝon, kvazaŭ ekparolonte, sed nenion li diris. Li supren rigardis al la vizaĝo de Sarumano kies malhelaj solenaj okuloj turniĝis suben al li, poste al Gandalfo, kaj li ŝajnis heziti. Gandalfo donis nenian signon, sed staris ŝtone silenta kvazaŭ iu, kiu atendas pacience alvokon ankoraŭ ne okazintan. La rajdistoj komence ekmoviĝis, aprobe murmurante pri la vortoj de Sarumano; kaj poste ili silentis kiel homoj sorĉitaj. Al ili ŝajnis, ke Gandalfo neniam alparolis tiel konvene kaj inde ilian mastron. Krudaj kaj orgojlaj nun ŝajnis liaj traktadoj kun Teodeno. Kaj sur iliajn korojn rampis ombro, timo pri iu granda danĝero: finiĝo de Markio en mallumo, al kiu pelas ilin Gandalfo, dum Sarumano staras apud pordo eskapa, tenante ĝin duonaperta tiel ke lumradio trapasas. Estiĝis peza silento.

Estis la gnomo Gimlio, kiu subite interrompis:

— La vortoj de tiu sorĉisto staras kap-al-piede, — li graŭlis, premtenante la tenilon de sia hakilo. — En la lingvo de Ortanko helpo signifas ruinon, kaj savado signifas mortigadon, tio estas evidenta. Sed ni venis ĉi tien ne por peti almozon.

— Silentu! — diris Sarumano, kaj dum momenteto lia voĉo estis malpli miela, kaj lumo ekflagris en liaj okuloj kaj malaperis. — Mi ankoraŭ ne volas alparoli vin, Gimlio, filo de Gloino. Malproksima estas via hejmo kaj malmulte koncernas vin la problemoj de tiu ĉi lando. Sed ne laŭ propra intenco vi enmiksiĝis en ili, kaj sekve mi ne kulpigos tiun rolon, kiun vi ludis — brave, mi tute ne dubas. Sed mi petas vin, permesu, ke mi unue interparolu kun la Reĝo de Rohano, mia najbaro, mia iama amiko.

» Kion vi volas diri, Reĝo Teodeno? Ĉu vi volas akcepti pacon kun mi kaj la tutan helpon, kiun miaj konoj, bazitaj sur longaj jaroj, kapablas alporti? Ĉu ni kune konsiliĝu kontraŭ misaj tagoj, kaj riparu niajn ofendojn tiel bonkore, ke niaj posedaĵoj ekfloru eĉ pli bele ol antaŭe?

Ankoraŭ ne respondis Teodeno. Ĉu li luktis kontraŭ kolero aŭ dubo,

povis diri neniu. Eomero parolis.

— Mastro, aŭdu min! — li diris. — Nun ni spertas la danĝeron, pri kiu ni estis avertitaj. Ĉu ni elrajdis al venko nur por fine stari konsternitaj pro maljuna mensogulo kun mielo sur la forka lango? Tiel parolus kaptota lupo al la dogoj, se ĝi kapablus. Kian helpon li povas havigi al vi, verdire? Nur eskapi el sia plago li deziras. Sed ĉu vi interparolu kun tiu ĉi peristo de perfido kaj murdo? Rememoru Teodredon ĉe la Travadejoj kaj la tombon de Hamo en la Profundaĵo de Helmo!

— Se paroli pri langoj venenaj, kion ni diru pri la via, juna serpento? — diris Sarumano, kaj ekflagro de lia kolero estis jam klare videbla. — Sed vidu, Eomero, filo de Eomundo! — li denove daŭrigis per sia mallaŭta voĉo. — Al ĉiu ties rolo. Via rolo estas armita braveco, kaj tiel vi akiras grandan honoron. Mortigu tiujn, kiujn via mastro nomas malamikoj, kaj estu kontenta. Ne intermiksiĝu en politikon, kiun vi ne komprenas. Sed eble, se vi iĝos reĝo, vi konstatos, ke tiu devas tre zorge elekti siajn amikojn. La amikecon de Sarumano kaj la potencon de Ortanko oni ne povas facilanime ĵeti flanken, negrave kiaj plendmotivoj eble kuŝas malantaŭe. Vi venkis en batalo, ne en milito — kaj nur per helpo, pri kiu vi ne povas kalkuli alian fojon. Vi eble trovos la Ombron de l' Arbaro poste ĉe via propra pordo: ĝi estas kaprica kaj sensenca kaj ne amas la homaron.

» Sed, mastro de Rohano, ĉu oni nomu min murdinto pro tio, ke kuraĝuloj mortis dumbatale? Se vi ekmilitos, senbezone ĉar tion mi ne deziras, homoj estos mortigitaj. Sed se mi estas pro tio murdisto, tiuokaze la tuta domanaro de Eorlo estas murdmakulita: ĉar tiu ofte militis, kaj atakis multajn defiintojn. Tamen kun iuj ili poste paciĝis, ne malpli valore tial ke ĝi estis politika. Mi diras, Reĝo Teodeno: ĉu ni paciĝu kaj amikiĝu, vi kaj mi? Tion ni rajtas ordoni.

— Ni havos pacon, — diris Teodeno finfine, malklare kaj pene. Pluraj rajdistoj ĝoje ekkriis. Teodeno levis sian manon. — Jes, ni havos pacon, — li diris jam klarvoĉe, — ni havos pacon, kiam vi kaj ĉiuj viaj faraĵoj estos pereintaj, kiel ankaŭ la faraĵoj de via malhela mastro, al kiu vi volas liveri nin. Vi estas mensogulo, Sarumano, kaj koruptanto de la homaj koroj. Vi etendas al mi vian manon kaj mi perceptas nur fingron el la krifaro de Mordoro. Kruela kaj malvarma! Eĉ se via milito kontraŭ min estus justa — kia ĝi ne estis, ĉar eĉ se vi estus dekoble pli saĝa, vi ne rajtus regi min kaj la miajn por via propra profito, kiel vi deziris — eĉ tiam, kion vi dirus pri viaj torĉoj en Ŭestfaldo kaj la infanoj morte kuŝantaj tie? Kaj oni dishakis la korpon de Hamo antaŭ la pordego de Kornburgo post kiam li estis mortinta. Kiam vi, pendos de pendumilo ĉe via fenestro por distri la proprajn korvojn, mi havos pacon kun vi kaj kun Ortanko. Tiom pri la

domanaro de Eorlo. Malpli granda filo de grandaj prapatroj mi estas, sed al mi ne necesas leki viajn fingrojn. Turnu vin aliterenen. Sed mi timas, ke via voĉo perdis sian ĉarmon.

La rajdistoj gapis supren al Teodeno kvazaŭ homoj abrupte elrevigitaj. Malglata kiel la voĉo de maljuna korako sonis en iliaj oreloj la voĉo de ilia mastro post la muziko de Sarumano. Sed Sarumano dum kelka tempo estis tordita de kolero. Li apogis sin trans la barilon, kvazaŭ li volus bati la reĝon per sia bastono. Al iuj subite ŝajnis, ke ili vidas serpenton strecĉantan sin por frapmordi.

— Pendumiloj kaj korvoj! — li siblis, kaj ili ektremis pro la hida ŝanĝiĝo. — Kadukulo! Kio estas la domaro de Eorlo, se ne pajlotegmenta stokejo, kie banditoj drinkas en la stinkaĉo kaj iliaj bubaĉoj rampaĉas sur la planko inter la hundoj? Tro longe ili mem eskapis pendumilon. Sed venas la maŝnodo, malrapide tirota, strikta kaj dura en la fino. Pendumiĝu, se vi volas! — Nun lia voĉo ŝanĝiĝis, dum li malrapide reregis sin. — Mi ne scias, kial mi paciencis paroli al vi. Ĉar vin mi ne bezonas, ankaŭ ne vian etan bandon da galopuloj tiel rapide fuĝantaj kiel antaŭenirantaj, ĉevalmastro Teodeno. Antaŭlonge mi proponis al vi staton, kiun vi ne meritas, nek spiritas. Mi jam denove proponis al vi tion, tiel ke tiuj, kiujn vi trompis, povu klare vidi la elekton inter la vojoj. Vi havigis al mi fanfaronojn kaj insultojn. Estu tiel. Reiru al viaj kabanoj.

» Sed vi, Gandalfo! Almenaŭ pri vi mi malĝojas, simpatiante vian honton. Riel povas esti, ke vi toleras tian societon? Ĉar vi estas fiera, Gandalfo, kaj ne senkiale, ĉar vi havas menson noblan kaj okulojn, kiuj rigardas tiel profunden kiel foren. Eĉ nun vi ne atentos miajn konsilojn, ĉu?

Gandalfo ekmoviĝis kaj rigardis supren.

— Ĉu vi volas diri ion, kion vi ne diris dum nia pli frua renkontiĝo? — li demandis. — Aŭ eble vi volas maldiri ion?

— Ĉu maldiri? — Sarumano paŭzis kaj meditis, kvazaŭ konfuzite. — Ĉu maldiri? Mi klopodis konsili vin viaprofite, sed vi apenaŭ aŭskultis. Vi estas fiera kaj ne ŝatas konsilojn, ĉar vi ja havas stokon da propra saĝo. Sed tiuokaze vi eraris, laŭ mia opinio, intence miskomprenante miajn celojn. Mi timas, ke pro mia entuziasmo persvadi vin, mi perdis paciencon. Kaj vere mi tion bedaŭras. Ĉar mi sentis al vi nenian malbonvolon; kaj eĉ nun mi neniel sentas tion, malgraŭ tio, ke vi revenas al mi en societo de perfortuloj kaj malkleruloj. Kial senti tion? ĉu ni ne estas ambaŭ membroj de grava kaj antikva ordeno, tre elstara en Mez-Tero? Nia amikeco same profitus al ni ambaŭ. Multon ni povus ankoraŭ atingi kune por kuraci la malordaĵojn de la mondo. Ni komprenu unu la alian kaj forigu el la pensoj jenajn malpli gravajn personojn. Ili atendu niajn decidojn! Por la komuna

bono mi pretas rebonigi la pasintecon kaj akcepti vin. Ĉu vi ne volas interkonsiliĝi kun mi? Ĉu vi ne venu supren?

Tiom granda estis la potenco, uzita de Saramano dum tiu ĉi lasta provo, ke neniu staranto en aŭdodistanco estis neemociita. Sed nun la envulto estis tute alia. Oni aŭdis admonon de bonkora reĝo al erarinta sed multe amata ministro. Sed oni estis forfermitaj, aŭskultante de malantaŭ pordo vortojn ne direktitajn al ili: misedukitaj infanoj aŭ stultaj servistoj subaŭskultantaj la malfacile kompreneblajn interparolojn de siaj superuloj, kaj scivolantaj kiel tiuj efikos al ilia sorto. El pli alta modlilo estis tiuj du: respektindaj kaj saĝaj. Neeviteble ili kreus aliancon. Gandalfo certe supreniros en la turegon por diskuti aferojn profundajn kaj eksterkomprenajn en la altaj ĉambroj de Ortanko. La pordo estos fermita, kaj oni lasos ilin ekstere, forsenditajn por atendi taskojn aŭ punojn. Eĉ en la menso de Teodeno formiĝis tiu penso kiel ombro de dubo: “Li perfidos nin; li iros — ni estos perditaj”.

Tiam Gandalfo ridis. Malaperis la fantazio kvazaŭ fumblovaĵo.

— Sarumano, Sarumano! — diris Gandalfo ankoraŭ ridante. — Sarumano, vi maltrafis vian vivovojon. Vi devus esti reĝa pajaco perlaboranta vian panon, kaj ankaŭ vipobatojn, per mokimitado de liaj konsilistoj. Ha nu! — li paŭzis, regante sian amuziĝon. — Ĉu kompreni unu la alian? Mi timas, ke mi estas ekster via komprenivo. Sed vin, Sarumano, mi eĉ tro bone nun komprenas. Mi, pli klare ol vi supozas, mernoras viajn argumentojn kaj viajn farojn. Kiam mi lastfoje vizitis vin, vi estis provoso de Mordoro, kaj tien mi estis sendota. Vidu, tiu gasto kiu eskapis de la tegmento, pensos dufoje antaŭ ol reeniri tra la pordo. Ne, al mi ŝajnas, ke mi ne supreniru. Sed aŭskultu, Sarumano, la lastan fojon! Ĉu vi ne volas veni ĉi tien? Isengardo pruviĝis malpli fortika ol kredis ĝin viaj espero kaj fantazio. Eble tiel estos pri aliaj aferoj, kiujn vi ankoraŭ fidas. Ĉu ne estus bone forlasi ĝin por kelka tempo? Turniĝi al novaj aferoj, eble? Pensu bone, Sarumano! Ĉu vi ne volas veni suben?

Ombro trapasis la vizaĝon de Sarumano; poste ĝi morte blankiĝis. Antaŭ ol li povis tion kaŝi, oni vidis malantaŭ la angormasko menson duboplenan, malŝatantan resti kaj timantan forlasi sian rifuĝejon. Dum sekundo li hezitis, kaj neniu spiris. Poste li parolis, kaj lia voĉo estis kriĉa kaj malvarma, fiero kaj malamego ekregis lin.

— Ĉu mi venu suben? — li mokis. — Ĉu homo senarmila descendas por paroli kun rabistoj en plena aero? Mi povas aŭdi vin sufiĉe bone de ĉi tie. Stultulo mi ne estas, kaj mi ne fidas vin, Gandalfo! Tiuj ne staras malkaŝe sur mia ŝtuparo, sed mi scias, kie embuskas la sovaĝaj arbardemonoj sub via komando.

— Perfiduloj ĉiam malfidemas, — respondis Gandalfo lace. — Sed pri

via haŭto ne necesas al vi timi. Mi ne deziras mortigi aŭ difekti vin, kiel vi scius, se vi vere komprenus min. Kaj mi kapablas protekti vin. Mi proponas al vi lastan ŝancon. Vi rajtos forlasi Ortankon libere, se vi tion elektos.

— Tio sonas bele, — rikanis Sarumano. — Tute laŭ la maniero de Gandalfo la Griza: tiel degna kaj treege bonkora. Mi ne dubas, ke vi trovus Ortankon ampleksa kaj mian foriron oportuna. Sed kial mi volu foriri? Kaj kion signifas ĉe vi "libera"? Ekzistas kondiĉoj, mi supozas.

— Kialojn por foriro vi povas vidi tra viaj fenestroj, — respondis Gandalfo. — Aliaj venos al vi en la kapon. Viaj servistoj estas detruitaj kaj dispelitaj; viajn najbarojn vi igis malamikaj; kaj vi trompis vian novan mastron, aŭ provis tion fari. Kiam lia okulo turniĝos ĉi tien, ĝi estos ruĝa okulo de kolero. Sed kiam mi diras "libera", mi celas diri "libera": libera el ĉenoj aŭ ordonoj: iru kien vi volas, Sarumano, eĉ al Mordoro, se tion vi deziras. Sed unue vi cedos al mi la ŝlosilon de Ortanko kaj vian bastonon. Ili estos garantiaĵoj por via konduto, redonotaj pli poste, se vi meritos ilin.

La vizaĝo de Sarumano griziĝis, tordiĝis pro koleregо, kaj ruĝa lumo ĉendiĝis en liaj okuloj. Li ridis sovaĝe.

— Pli poste! — li kriis, kaj lia voĉo altiĝis kriĉe. — Pli poste! Jes, kiam vi havos ankaŭ la ŝlosilojn de Baraduro mem, mi supozas; kaj la kronojn de sep reĝoj, kaj la bastonojn de la Kvin Sorĉistoj, kaj aĉetos por vi paron da botoj multe pli grandaj ol tiuj, kiujn vi portas nun. Jen plano modesta. Apenaŭ plano, por kiu necesas mia helpo! Mi havas aliajn farotaĵojn. Ne estu stultulo. Se vi volas trakti kun mi dum vi havas okazon, foriru kaj revenu malebria! Kaj lasu malantaŭe tiujn gorĝotranĉulojn kaj bagatelajn ĉifonulojn, kiuj pendas ĉe via vosto! Bonan tagon! — li sin turnis kaj forlasis la balkonon.

— Revenu, Sarumano! — diris Gandalfo per komanda voĉo. Mirigante la aliajn, Sarumano returniĝis, kaj kvazaŭ trenite kontraŭvole li revenis malrapide al la fera barilo, sin apogante al ĝi, anhelante. Lia vizaĝo estis sulka kaj ŝrumpinta. Lia mano grifece krampis la pezan nigran bastonon. — Mi ne permesis al vi foriri, — diris Gandalfo severe. — Mi ne finparolis. Vi iĝis stultulo, Sarumano, kaj tamen kompatinda. Vi ankoraŭ povis forturniĝi de malsaĝaĵo kaj misagado kaj servi. Sed vi elektis resti kaj maĉi la finaĵojn de viaj malnovaj komplotoj. Do restu! Sed mi avertas vin, ke ne facile vi denove eltiriĝos. Krom se la malhelaj manoj de la oriento elstreĉiĝos por preni vin. Sarumano! — li vokis, kaj lia voĉo kreskis potence kaj aŭtoritate. — Vidu, mi ne estas Gandalfo la Griza, kiun vi perfidis. Mi estas Gandalfo la Blanka, kiu revenis el la morto. Vi ne plu havas koloron, kaj mi forĵetas vin el la ordeno kaj el la Konsilio.

Li levis sian manon, kaj parolis malrapide per klara malvarma voĉo:

— Sarumano, via bastono estas rompita.

Aŭdiĝis krako, kaj la bastono dissplitiĝis en la mano de Sarumano, kaj ĝia kapaĵo falis suben al la piedoj de Gandalfo.

— Iru! — diris Gandalfo. Kriante, Sarumano retrofalis kaj rampis for. Tiumomente peza brilaĵo subenĵetiĝis desupre. Ĝi resaltis de la fera barilo, ĝuste kiam Sarumano lasis ĝin, kaj proksime pasante la kapon de Gandalfo, ĝi frapis la ŝtupon, sur kiu li staris. La barilo sonoris kaj rompiĝis. La ŝtupo fendiĝis kaj splitiĝis brilsparke. Sed la bulo estis nedifektita: ĝi ruliĝis plu laŭ la ŝtuparo, globo kristala, malhela, sed ardanta je fajra kerno. Dum ĝi forsaltis al flako, Grinĉjo postkuris kaj levis ĝin.

— Murdema kanajlo! — kriis Eomero. Sed Gandalfo estis senemocia.

— Ne, tion ĵetis ne Sarumano, — li diris; — eĉ ne laŭ lia ordono, ŝajnas al mi. Ĝi venis el fenestro tre supra. Disiĝa pafo de mastro Vermlango, mi konjektas, sed maltrafe celita.

— Eble la celo maltrafis, ĉar li ne povis decidi, kiun li pli malamas, vin aŭ Sarumanon, — diris Aragorno.

— Eble estas tiel, — diris Gandalfo. — Malmulte da komforto havos tiuj du per sia kunuleco: ili maĉos vorte unu la alian. Sed la puno estas justa. Se iam Vermlango forlasos Ortankon viva, tio estos pli ol li meritis. Hej, junulo, tion prenos mi! Mi ne petis, ke vi prenu ĝin, — li kriis, abrupte sin turnante kaj vidante Grinĉjon suprenveni laŭ la ŝtuparo, malrapide, kvazaŭ li portus grandan pezaĵon. Li descendis renkonten kaj haste prenis la malhelan globon de la hobito, volvante ĝin per la faldaĵoj de sia mantelo. — Mi prizorgos tion ĉi, — li diris. — Ĝi ne estas io, kion Sarumano elektus forĵeti.

— Sed eble li havos aliajn objektojn por ĵeti, — diris Gimlio. — Se jam finiĝis la debato, ni almenaŭ reiru el la ĵetdistanco!

— Ĝi finiĝis, — diris Gandalfo. — Ni iru.

Ili turnis la dorsojn al la pordo de Ortanko kaj descendis. La rajdistoj ĝoje vivuis la reĝon kaj salutis Gandalfon. La sorĉo de Sarumano estis rompita; ili vidis lin veni vokite, kaj forrampi forsendite.

— Nu, dirite-farite, — diris Gandalfo. — Nun mi devas trovi Arbobarbon kaj sciigi al li, kiel progresis la aferoj.

— Certe li jam divenis? — diris Gaja. — Ĉu estis verŝajne, ke ili finiĝu alimaniere?

— Ne tre verŝajne, — respondis Gandalfo, — kvankam ili venis al ekvilibro harpeza. Sed mi havis motivojn por provi, iujn indulgemajn, aliajn malpli. Unue al Sarumano estis montrite, ke la potenco de lia voĉo velkas. Li ne povas esti samtempe tirano kaj konsilanto. Kiam komploto maturiĝas, ĝi ne plu restas sekreta. Tamen li enfalis en kaptilon, kaj provis trakti

unuope siajn viktimojn, dum aliaj aŭskultis. Poste mi donis al li lastan ŝancon tute justan: rezigni tiel pri Mordoro kiel pri siaj privataj planoj kaj kompensi per helpo al ni, kiam ni tion bezonis. Li konas niajn bezonojn, neniu pli bone. Multe li povus servi nin. Sed li elektis tion malakcepti kaj reteni la potencon de Ortanko. Li ne volas servi, nur komandi li volas. Li vivas nun terurite de Mordoro kaj tamen li ankoraŭ revas travivi la ŝtormon. Malfeliĉa stultulo! Li estos vorita, se la potenco de la oriento etendos siajn brakojn al Isengardo. Mi ne povas detrui Ortankon de ekstere, sed kiu scias, kion Saŭrono povas fari?

— Sed se Saŭrono ne venkos? Kion vi faros al li? — demandis Grinĉjo.

— Mi? Nenion! — diris Gandalfo. — Nenion mi faros al li. Mi ne deziras mastrecon. Kio okazos al li? Mi ne scias. Mi funebras, ĉar tiom da estinta bono nun putras en la turego. Tamen por ni la aferoj progresis ne malbone. Strangaj estas la turniĝoj de la sorto! Ofte ja difektas sin malamego! Mi opinias, ke eĉ se ni enirus ni povus trovi en Ortanko malmultajn trezorojn pli valorajn ol tio, kion Vermlango ĵetis al ni.

Akra kriĉo, subite haltigita, aŭdiĝis tra aperta tre alta fenestro.

— Ŝajnas, ke ankaŭ Sarumano same opinias, — diris Gandalfo. — Ni lasu ilin!

Nun ili reiris al la pordegoruino. Apenaŭ ili trapasis sub la arkaĵo, el inter la ombroj de l' amasigitaj ŝtonoj, kie ili staris, elpaŝis Arbobarbo kaj dekduo da aliaj entoj. Aragorno, Gimlio kaj Legolaso mire gapis al ili.

— Jen tri el miaj kunuloj, Arbobarbo, — diris Gandalfo. — Mi parolis pri ili, sed vi ankoraŭ ne vidis ilin. — Li nomis ilin unuope.

La maljuna ento rigardis ilin longe kaj esplbre, kaj alparolis ilin laŭvice. Laste li turnis sin al Legolaso:

— Do, vi venis la longan vojon de Momarbaro, bona elfo? Tre granda arbarego ĝi iam estis!

— Kaj plu estas, — diris Legolaso. — Sed ne tiom granda, ke ni ĝiaj loĝantoj tediĝas vidante novajn arbojn. Mi tre ŝatus vojaĝi en la Fangorna Arbaro. Mi apenaŭ pasis ties randon, kaj mi ne volis retroiri.

La okuloj de Arbobarbo ekglimis plezure.

— Mi esperas, ke via deziro realiĝos antaŭ ol la montoj multe pliaĝiĝos, — li diris.

— Mi venos, se tion permesos la sorto, — diris Legolaso. — Mi interkonsentis kun mia amiko, ke se ĉio iros bone, ni vizitos kune Fangornon — laŭ via permeso.

— Iu ajn elfo, kiu akompanos vin, estos bonvena, — diris Arbobarbo.

— La menciita amiko estas ne elfo, — diris Legolaso. — Temas pri Gimlio, filo ne Gloino, jene. — Gimlio profunde riverencis, kaj hakilo glitis

el lia zono kaj klakis surtere.

— Hum, hm! Ha nu, — diris Arbobarbo, rigardante lin malhelokule. — Gnomo kaj hakilportanto! Hum! Mi bonvolas al elfoj; sed vi petas multon. Jen stranga amikeco.

— Stranga ĝi eble ŝajnas, — diris Legolaso, — sed dum Gimlio vivos, mi ne venos sola al Fangorno. Lia hakilo ne celas arbojn, sed orkajn nukojn, ho Fangorno, mastro de l' Fangorna Arbaro. Kvardek du li hakis en la batalo.

— Hu! Vidu! — diris Arbobarbo. — Jen rakonto pli agrabla! Nu, nu, la aferoj progresu laŭvole; kaj ne necesas hasti renkonte al ili. Sed jam ni devas provizore disiĝi. La tago proksimiĝas al la fino, tamen Gandalfo diras, ke vi devas foriri antaŭ la noktiĝo, kaj la Mastro de Markio forte deziras la propran hejmon.

— Jes, ni devas iri, kaj jam nun, — diris Gandalfo. — Mi timas, ke mi devas forpreni de vi viajn pordgardistojn. Sed vi sufiĉe bone travivos sen ili.

— Eble jes, — diris Arbobarbo. — Sed ili mankos al mi. Ni tiel rapide amikiĝis, ke ŝajnas al mi, ke mi iĝas hastema — retroirante al la juneco, eble. Sed vidu, ili estas la unua novaĵo sub la suno kaj luno, kiun mi rimarkis dum longa, longa tempo. Mi ne forgesos ilin. Mi inkluzivis iliajn nomojn en la Longan Liston. Entoj tion memoros:

> Entoj elteraj, monte maljunaj,
> vaste vagantaj, akuotrinkemaj;
> ĉasule malsataj, infanoj-hobitoj,
> rida popolo, etaj estuloj,

ili daŭre amikos tiom longe, kiom renoviĝos la folioj. Fartu bone! Sed se vi aŭdos novaĵojn tie en via agrabla lando, en la Provinco, sendu al mi informon! Vi scias, kion mi celas: informo aŭ ekvido de la entedzinoj. Venu mem, se tio eblos!

— Ni tion faros! — diris Gaja kaj Grinĉjo kune, kaj ili forturniĝis rapide. Arbobarbo rigardis ilin kaj silentis kelkan tempon, skuante penseme sian kapon. Poste li sin turnis al Gandalfo.

— Do, Sarumano ne volis foriri, ĉu? — li diris. — Tion mi supozis. Lia koro tiel putras, kiel koro de nigra huorno. Tamen, se mi estus venkita kaj se estus detruitaj ĉiuj miaj arboj, mi ne elvenus, dum restus al mi unusola malhela kaŝtruo.

— Ne, — diris Gandalfo. — Sed vi ne komplotis kovri la tutan mondon per viaj arboj kaj sufoki ĉiujn aliajn vivantaĵojn. Sed jen vi havas, Sarumano restas por dorloti sian malamegon kaj teksi denove tiajn araneaĵojn, kiajn li povas. Li havas la ŝlosilon de Ortanko. Sed nepre oni ne permesu, ke li

eskapu.

— Efektive, ne! Entoj tion aranĝos, — diris Arbobarbo. — Sarumano ne metos sian plandon for de la roko, sen mia permeso. Entoj lin priatentos.

— Bone! — diris Gandalfo. — Tion mi esperis. Nun mi povos iri kaj reveni al aliaj aferoj kun unu zorgo malpli. Sed vi devas esti singardaj. La akvoj jam malinundis. Ne sufiĉos nur postenigi sentinelojn ĉirkaŭ la turego, mi timas. Sendube estis elfositaj profundaj pasejoj sub Ortanko, kaj Sarumano esperas iri kaj reveni nerimarkite, post nelonge. Se vi entreprenos la taskon, mi petas vin enverŝi denove la akvojn kaj daŭrigi ĝis Isengardo estos stagna lago, aŭ vi eltrovos la elirejojn. Kiam ĉiuj subteraj lokoj estos dronintaj kaj la elirejoj blokitaj, tiam Sarumano devos resti supraetaĝe kaj trarigardi la fenestrojn.

— Fidu la entojn! — diris Arbobarbo. — Mi traserĉos la valon de kapo ĝis piedoj kaj rigardos sub ĉiun ŝtoneton. Arboj revenos por loĝi ĉi tie, arboj maljunaj, arboj sovaĝaj. Mi nomos ĝin Gardarbaro. Eĉ sciuro ne eniros tien sen mia scio. Fidu la entojn. Ĝis pasos sepoble tiom da jaroj, dum kiuj li turmentis nin, ni ne laciĝos pri la gardo.

11

La palantiro

La suno estis sinkanta malantaŭ la longan okcidentan branĉon de la montoj, kiam Gandalfo kaj liaj kunuloj, kaj la reĝo kun liaj rajdistoj, ekiris denove el Isengardo. Gandalfo sidigis Gajan malantaŭ si, kaj Aragorno Grinĉjon. Du reĝaj soldatoj antaŭeniris rajdante rapide kaj baldaŭ forpasis el la vido malsupre en la valon. La ceteraj sekvis facilpaŝe.

Entoj en solena vico staris statuece ĉe la pordego kun la longaj brakoj suprenlevitaj, sed ili eligis neniun sonon. Gaja kaj Grinĉjo retrorigardis, kiam ili jam trairis iom la serpentumitan vojon. Sunlumo ankoraŭ brilis sur la ĉielo, sed longaj ombroj etendiĝis super Isengardo: grizaj ruinoj jam falantaj en mallumon. Tie staris Arbobarbo sola nun, kiel malproksima stumpo de maljuna arbo: la hobitoj pensis pri la unua renkontiĝo, sur la sunumita breto ĉeborde de Fangorno.

Ili alvenis la pilastron de la Blanka Mano. La pilastro plu staris, sed la gravurita mano estis deĵetita kaj diserige frakasita. Ĝuste en la mezo de la vojo kuŝis la longa montrofingro, blanka en la krepusko, ĝia ruĝa ungo estis nigre malheliĝanta.

— La entoj priatentas ĉiujn detalojn! — diris Gandalfo. Ili rajdis plu, kaj la vespero profundiĝis en la valo.

— Ĉu ni rajdos tre longe hodiaŭ vespere, Gandalfo? — demandis Gaja post iom da tempo. — Mi ne scias, kiel vi sentas vin kun bagatela ĉifonulo pendanta malantaŭ vi; sed la ĉifonulo laciĝis kaj volonte ĉesos pendi kaj kuŝiĝos.

— Do tion vi aŭdis, ĉu? — diris Gandalfo. — Ne lasu, ke tio estigu rankoron! Estu dankema, ke vortoj pli longaj ne estis celitaj al vi. Li neniam antaŭe renkontis hobiton kaj ne sciis kiel vin alparoli. Sed li atentis vin. Se tio malkuspos vian fieron, mi povas diri, ke ĉi-momente vi kaj Grinĉjo pli okupas liajn pensojn ol ĉiuj ni aliaj. Kiuj vi estas; kiel vi venis tien, kaj kial; ĉu vi estis kaptitaj kaj, se jes, kiel vi eskapis kiam pereis ĉiuj orkoj — ĝuste tiaj problemetoj ĝenas la grandan menson de Sarumano. Rikano de li, Gajadoko, estas komplimento, se vi sentas vin honorita pro lia interesiĝo.

— Dankon! Sed pli honore estas pendi ee via vosto, Gandalfo. Ekzemple, en tiu situacio oni havas eblecon duan fojon starigi demandon. Ĉu ni rajdos longe ĉi-nokte?

Gandalfo ridis.

— Hobito plej nedampebla! Ĉiuj sorĉistoj devus zorgi pri unu-du hobitoj, kiuj instruu al ili la signifon de la vortoj kaj korektu ilin. Mi petas vian pardonon. Sed mi dediĉis penson eĉ al tiaj simplaj aferoj. Ni rajdos dum kelkaj horoj, malhaste, ĝis ni alvenos la finon de la valo. Morgaŭ ni devos rajdi pli rapide. Kiam ni venis, ni intencis iri rekte de Isengardo al la reĝa domo en Edoraso tra la ebenaĵo, rajdo kelktaga. Sed ni pripensis kaj ŝanĝis la planon. Kurieroj iris antaŭen al la Profundaĵo de Helmo, por averti, ke la reĝo revenos morgaŭ. De tie li rajdos kun multaj soldatoj al Dunharo laŭ vojetoj sur la montetoj. Ekde nun ne pli ol du aŭ tri samtempe rajtas iri malkaŝite tra la ebenaĵo, ĉu tage ĉu nokte, kiam tio estas evitebla.

— Aŭ neniom aŭ duobla porcio, jen via maniero! — diris Gaja. — Mi timas, ke mi rigardas ne pli malproksimen ol ĝis la hodiaŭa kuŝejo. Kie kaj kio estas la Profundaĵo de Helmo kaj ĉio cetera? Mi scias nenion pri tiu ĉi tereno.

— Do prefere lernu iom, se vi volas kompreni la okazaĵojn. Sed ne ĝuste nun, kaj ne per mi: premas min tro multaj pripensendaĵoj.

— En ordo, mi demandos al Paŝegulo apud la bivaka fajro: li estas malpli kaŝema. Sed pro kio tiu ĉi sekureco? Mi kredis, ke la batalon ni gajnis!

— Jes, ni venkis, sed nur en la unua batalo, kaj tio per si mem pligrandigas nian danĝeron. Ekzistis ia ligiteco inter Isengardo kaj Mordoro, kiun mi ĝis nun ne sondis. Kiel ili interŝanĝis informojn, mi ne tute certas; sed tion ili faris. La Okulo de Baraduro certe rigardas senpacience al la Sorĉista Valo, ŝajnas al mi, kaj al Rohano. Ju malpli ĝi vidas, des pli bone.

La vojo pasiĝis malrapide, serpentumante tra la valo. Jen pli fore, jen pli proksime, Iseno fluis sur sia ŝtonoza fundo. Nokto malsupreniris de la montaro. Ĉiuj nebuletoj jam malaperis. Blovis vento malvarma. La luno, jam kreske rondiĝanta, plenigis la orientan ĉielon per pala malvarma brileto. La ŝultroj de l' montoj dekstre deklivis al la nudaj montetoj. Grize antaŭ ili apertiĝis la larĝa ebenaĵo.

Finfine ili haltis. Poste ili deflankiĝis postlasinte la ĉefvojon kaj denove iris laŭ la dolĉa supra herbaro. Irinte okcidenten post ĉirkaŭ unu mejlo ili alvenis valon. Tiu apertiĝis suden, retrokliniĝante al la deklivo de ronda Dol Barano, la lasta monto de la nordaj montaroj, verdsuba, kronita de eriko. La valflankoj hirtis je la pasintjara filiko, meze de kiu la strikte volvitaj printempofrondoj ekpuŝiĝis tra la dolĉaroma tero. Dornarbustoj kreskis dense sur la malaltaj teramasoj, kaj sub tiuj ili bivakis, proksimume du horojn antaŭ la mezo de la nokto. Ili ĉendis fajron en kavaĵo, inter la radikoj de diskreska kratago, arbece alta, tordita pro maljuneco sed ĉiumembre sana. Burĝonoj ŝveliĝis sur ĉiu branĉeta ekstremo.

Sentineloj estis postenigitaj, po du ĉiun vaĉperiodon. La aliaj, vespermanĝinte, volvis sin per manteloj kaj dormis. La hobitoj kuŝis en angulo senakompane sur amaso de malnova filiko. Gaja estis dormema, sed Grinĉjo nun ŝajnis strange senripoza. La filikoj krakis kaj siblis dum li tordiĝis kaj turniĝis.

— Kio estas al vi? — demandis Gaja. — Ĉu vi surkuŝas formikejon?

— Ne, — diris Grinĉjo, — sed mi ne estas komforta. Mi scivolas, kiom da tempo pasis de kiam mi lastfoje dormis en lito?

— Kalkulu perfingre! — oscedis Gaja. — Sed vi certe scias, de kiam ni forlasis Lorienon.

— Aĥ, tiom! — diris Grinĉjo. — Mi aludis realan liton en dormoĉambro.

— Nu, do Rivendelo, — diris Gaja. — Sed mi povus dormi kie ajn hodiaŭ.

— Vi bonŝancis, Gaja, — diris Grinĉjo mallaŭte, post paŭzo. — Vi rajdis kun Gandalfo.

— Nu, do kio?

— Ĉu vi informiĝis aŭ ekkonis ion pere de li?

— Jes, sufiĉe multe. Pli ol kutime. Sed vi aŭdis ĉion aŭ la plejparton; vi estis tute proksime, kaj ni ne interŝanĝis sekretojn. Sed vi rajtos iri kun li morgaŭ, se vi opinias plimulte melki lin — kaj se li konsentos havi vin.

— Ĉu vere? Bone! Sed li estas tiel nekomunikema, ĉu ne? Tute ne ŝanĝiĝis.

— Ho, male! — diris Gaja, iomete vigliĝante kaj ekscivolante pri tio, kio ĝenas lian kunulon. — Li pligrandiĝis, aŭ io. Li kapablas esti kiel bonkora tiel timiga pli ol antaŭe, ŝajnas al mi. Li ŝanĝiĝis; sed mi ankoraŭ ne havis okazon konstati ĝis kioma grado, Sed pensu pri la lasta parto de tiu afero kun Sarumano! Memoru, ke Saramano iam estis superulo de Gandalfo; estro de l' Konsilio, kio ajn tiu estas precize. Li estis Sarumano la Blanka. Gandalfo estas nun la Blanka. Sarumano venis laŭordone, kaj lia bastono estis forprenita; kaj poste estis ordonite, ke li iru, kaj li iris.

— Nu, se Gandalfo entute ŝanĝiĝis, nun li estas pli ol antaŭe nekomunikema, jen ĉio, — Grinĉjo argumentis. — Ekzemple, tiu vitra globo. Ĝi ŝajnis tre plaĉi al li. Ion li scias aŭ konjektas pri ĝi. Sed ĉu li sciigis tion al ni? Eĉ ne unuvorte. Tamen levis ĝin mi, kaj mi malhelpis, ke ĝi ruliĝu en flakon. "Hej, junulo, tion prenos mi", — jen ĉio. Mi scivolas, kio ĝi estas? Ĝi sentiĝis tre peza. — La voĉo de Grinĉjo tre mallaŭtiĝis, kvazaŭ li parolus al si.

— Hej, — diris Gaja. — Do ĝuste tio ĝenas vin, ĉu? Nu, knabo Grinĉjo, ne forgesu la sentencon de Gildoro, kiun Sam kutimis citi: "Ne enmiksiĝu

en sorĉistajn aferojn, ĉar ili estas subtilaj kaj ekkoleriĝemaj”.

— Sed nia tuta vivo jam dum monatoj estis unu longa enmiksiĝo en la aferojn de sorĉistoj, — diris Grinĉjo. — Mi ŝatus iom da informoj kune kun la danĝero. Mi ŝatus rigardi tiun globon.

— Endormiĝu! — diris Gaja. — Vi sufiĉe informiĝos pli aŭ malpli baldaŭ. Kara mia Grinĉjo, neniu Tjuko iam ajn superis Brandobokon rilate scivolemon, sed ĉu la tempo konvenas, mi demandas?

— En ordo! Kiel domaĝas, ke mi diras al vi, ke mi ŝatus rigardi tiun ŝtonon? Mi scias, ke mi ne povas havi ĝin, dum maljuna Gandalfo kovas ĝin kiel ovon kokino. Sed ne multe helpas ricevi de vi ne pli ol iu *vi-ne-povas-havi-ĝin-do-endormiĝu*!

— Nu, kion alian mi povus diri? — diris Gaja. — Mi bedaŭras, Grinĉjo, sed vi vere devas atendi la matenon. Mi estos tiom scivola, kiom vi volos post la matenmanĝo, kaj mi helpos laŭ mia kapablo pri iom da sorĉisto-kaĵolado. Sed mi ne plu povas maldormi. Se mi ankoraŭ pli oscedos, mi splitiĝos interorele. Bonan nokton!

Grinĉjo ne respondis. Nun li kuŝis senmove, sed dormo daŭre forestis; kaj lin ne kuraĝigis la sono de Gaja spiranta mallaŭte, ekdorminta kelkajn minutojn post la nokta saluto. Penso pri la malhela globo ŝajnis plifortiĝi, dum ĉio kvietiĝis. Grinĉjo sentis denove ties pezon en siaj manoj, kaj ree vidis la misterajn ruĝajn profundojn, en kiujn li momente rigardis. Li tordiĝis kaj turniĝis kaj klopodis pensi pri io alia.

Finfine li ne plu kapablis toleri tion. Li stariĝis kaj ĉirkaŭrigardis. Estis malvarme, kaj li volvis sin per sia mantelo. La luno brilis frida kaj blanka, rekte en la valon, kaj la ombroj de la arbustoj nigris. Ĉie ĉirkaŭe kuŝis dormaj figuroj. La du sentineloj ne videblis: ili supris sur la montflanko, eble, aŭ kaŝiĝis en la filiko. Pelite de ia impulso, kiun li ne komprenis, Grinĉjo paŝis singarde ĝis la kuŝejo de Gandalfo. Li subenrigardis al li. La sorĉisto ŝajnis dormanta, sed kun palpebroj ne plene fermitaj: vidiĝis okulbrileto sub liaj longaj okulharoj. Grinĉjo haste retropaŝis. Sed Gandalfo donis neniun indikon; kaj antaŭentrenite ankoraŭfoje, duone kontraŭvole, la hobito ree alrampis de malantaŭ la kapo de la sorĉisto. Tiu estis volvita per lankovrilo kun la mantelo supre sternita; kaj proksime apud li, inter la dekstra flanko kaj la fleksita brako, estis elstaraĵo, io ronda volvita per malhela tuko; lia mano ŝajnis ĵus forglitinta de ĝi al la tero.

Apenaŭ spirante, Grinĉjo rampis pli proksimen, futon post futo. Fine li surgenuiĝis. Poste li etendis kaŝe la manojn kaj malrapide levis la globon; ĝi ŝajnis ne tiel peza kiel li antaŭvidis. “Nur ia fasko da diversaĵoj eble, finfine”, — li pensis kun stranga sento de malŝarĝiĝo; sed li ne remetis la globon. Li staris momente, tenante ĝin. Tiam venis en lian menson ideo. Li

foriris piedpinte, trovis grandan ŝtonon, kaj revenis.

Li rapide forprenis la tukon, volvis en ĝin la ŝtonon kaj surgenuiĝe remetis ĝin apud la manon de la sorĉisto. Poste li finfine rigardis tion, kion li malkovris. Jen ĝi: glata kristala globo, nun malhela kaj morta, kuŝanta nude antaŭ liaj genuoj. Grinĉjo levis ĝin, haste kovris ĝin per la propra mantelo, kaj duone turniĝis por reiri al sia lito. Tiumomente Gandalfo turniĝis dumdorme kaj murmuris kelkajn vortojn: ili ŝajnis en fremda lingvo; lia mano elpalpis kaj ektenis la volvitan ŝtonon, poste li suspiris kaj ne plu moviĝis.

— Idiota stultulo! — Grinĉjo murmuris al si. — Vi estas tremponta vin en teruran malagrablaĵon. Tuj remetu ĝin! — Sed li nun konstatis, ke tremas liaj genuoj, kaj li ne aŭdacas sufiĉe proksimiĝi al la sorĉisto por atingi la pakaĵon. “Mi jam ne povos remeti ĝin sen veki lin, — li pensis, — almenaŭ ĝis mi estos pli trankvila. Do egale se mi unue ekrigardos ĝin. Tamen ne ĉi tie!” Li forŝteliĝis kaj eksidis sur verda teramaseto ne malproksime de sia lito. La luno enrigardis trans la randon de la valo.

Grinĉjo sidis kun la genuoj alfleksitaj kaj la globo inter ili. Li kurbiĝis proksime al ĝi, aspektante kiel avida infano antaŭ bovlo da manĝaĵo en angulo for de la aliuloj. Li flankentiris sian mantelon kaj rigardis al ĝi. La aero ĉirkaŭ li ŝajnis senmova kaj strečita. Komence la globo estis malhela, kun lunlumo glimanta sur ĝia surfaco. Poste vidiĝis malforta ardo kaj ekmoviĝo en la kerno, kaj ĝi fiksis liajn okulojn tiel ke li jam ne povis forrigardi. Baldaŭ la tuta interno ŝajnis fajranta; la globo ekgiris, aŭ la lumoj internaj estis turniĝantaj. Subite la lumoj estingiĝis. Li eligis spirospasmon kaj baraktis; sed li restis kurbiĝinta, premtenante per ambaŭ manoj la globon. Pli kaj pli proksimen li kurbiĝis, kaj poste rigidiĝis; dum kelka tempo liaj lipoj moviĝis sensone. Poste kun strangolita krio li falis dorsen kaj kuŝis senmova.

La krio estis trapika. La sentineloj alsaltis de sur la deklivoj. La tuta bivako baldaŭ vigliĝis.

— Do jen la ŝtelinto! — diris Gandalfo. Li haste ĵetkovris per sia mantelo la globon kie ĝi kuŝis. — Sed vi, Grinĉjo! Jen tre bedaŭrinda elturniĝo de l’ aferoj! — Li surgenuiĝis apud la korpo de Grinĉjo: la hobito kuŝis surdorse rigida kun senvidaj okuloj, gapantaj al la ĉielo. — Demonaĵo! Kian malbonon li faris al si mem kaj al ni ĉiuj? — La vizaĝo de l’ sorĉisto iĝis malloza kaj marasma.

Li kaptis la manon de Grinĉjo kaj kurbiĝis al lia vizaĝo, aŭskultante ĉu li spiras; poste li metis siajn manojn sur lian frunton. La hobito tremegis. Liaj okuloj fermiĝis. Li ekkriis kaj sidiĝis, gapante mirigite al ĉiuj ĉirkaŭaj vizaĝoj, palaj en la lunlumo.

— Ĝi ne estas por vi, Sarumano! — li kriis per alta sentona voĉo, retiriĝante disde Gandalfo. — Mi tuj sendos por ĝi. Ĉu vi komprenas? Diru ĝuste tion! — Poste li baraktis por stariĝi kaj fuĝi, sed Gandalfo retenis lin milde kaj firme.

— Peregrino Tjuko! — li diris. — Revenu!

La hobito malstreĉiĝis kaj retrofalis, tenegante la manon de l' sorĉisto.

— Gandalfo! — li kriis. — Gandalfo! Pardonu min!

— Ĉu pardoni vin? — demandis la sorĉisto. — Unue diru al mi, kion vi faris.

— Mi, mi prenis la globon kaj rigardis ĝin, — balbutis Grinĉjo, — kaj mi vidis aferojn, kiuj timigis min. Kaj mi deziris foriri, sed tion mi ne povis. Kaj poste li venis kaj starigis al mi demandojn; kaj li min rigardis, kaj jen ĉio, kion mi memoras.

— Tio ne sufiĉas, — diris Gandalfo severe. — Kion vi vidis, kaj kion vi diris?

Grinĉjo fermis siajn okulojn kaj tremis, sed diris nenion. Ĉiuj rigardis lin silente, krom Gaja, kiu sin forturnis. Sed la vizaĝo de Gandalfo plu severis.

— Parolu! — li diris.

Per mallaŭta hezita voĉo Grinĉjo rekomencis, kaj liaj vortoj malrapide iĝis pli klaraj kaj pli fortaj.

— Mi vidis malhelan ĉielon, altajn remparojn kaj etajn stelojn. Tio ŝajnis tre malproksima kaj antaŭ tre longe, tamen dura kaj klara. Poste la steloj spasme estingiĝis; ilin forbaris aĵoj flugilhavaj. Vere tre grandaj, ŝajnas al mi; sed en la vitraĵo ili similis gigantajn vespertojn, girantaj ĉirkaŭ la turego. Mi pensis, ke ili estas naŭ. Unu el ili ekflugis kontraŭ min, pli kaj pli grandiĝante. Tiu havis teruran... ne, ne! Tion mi ne povas diri. Mi klopodis fuĝi, ĉar mi pensis, ke ĝi elflugos; sed kiam ĝi kovris la tutan globon, ĝi malaperis. Poste venis *li*. Li ne parolis tiel, ke mi povu aŭdi vortojn. Li nur rigardis, kaj mi komprenis.

» — Do, vi revenis? Kial vi neglektis raporti dum tiom da tempo?

» Mi ne respondis. Li diris: "Kiu vi estas?" Mi ankaŭ tiam ne respondis, sed tio terure doloris al mi; kaj li insistis, do mi diris: "Hobito".

» Poste li subite ŝajnis ekvidi min, kaj li priridis min. Estis kruele. Estis kvazaŭ pikiĝi per tranĉiloj. Mi baraktis. Sed li diris: "Atendu momenton! Baldaŭ ni renkontiĝos denove. Diru al Sarumano, ke tiu ĉi frandaĵo ne estos lia. Mi tuj sendos por ĝi. Ĉu vi komprenas? Diru ĝuste tion!"

» Poste li rikanis al mi. Mi sentis ke mi dispeciĝas. Ne, ne! Nenion plu mi povas diri. Mi nenion alian memoras.

— Rigardu min! — diris Gandalfo.

Grinĉjo rigardis al li rekte en la okulojn. La sorĉisto kroĉis momente lian rigardon en silento. Tiam lia vizaĝo iĝis pli milda, kaj spureto de rideto aperis. Li metis sian manon malpreme sur la kapon de Grinĉjo.

— En ordo! — li diris. — Diru nenion pli! Vi ne difektiĝis. En viaj okuloj mankas mensogemo laŭ mia antaŭtimo. Sed ne longe li parolis al vi. Stultulo, sed honesta stultulo vi restas, Peregrino Tjuko. Uloj pli saĝaj farus eventuale pli maltrafe en tia krizo. Sed atentu jenon! Vin savis, kaj ankaŭ ĉiujn viajn amikojn, favora sorto, kiel oni ĝin nomas. Vi ne povas kalkuli pri tio duafoje. Se li demandus al vi ĝuste tie kaj tiam, preskaŭ certe vi dirus ĉion el viaj scioj, pereigante nin ĉiujn. Sed li tro avidis. Li ne volis nur informojn: li volis *vin* rapide, tiel ke li povu trakti vin malrapide en la Malhela Turego. Ne tremegu! Se vi enmiksiĝis en la aferojn de sorĉistoj, vi devas esti preta pripensi tiajn aferojn. Sed ek! Mi pardonas vin. Estu konsolita! La aferoj ne elfalis tiel malbone, kiel eblis.

Li levis Grinĉjon milde kaj reportis lin al lia lito. Gaja sekvis, kaj sidiĝis apude.

— Kuŝu tie kaj ripozu, se vi povas, Grinĉjo! — diris Gandalfo. — Fidu min. Se vi denove sentos juki viajn manplatojn, sciigu min! Tiaj aferoj estas kuraceblaj. Sed ĉiuokaze, kara hobito, ne metu denove pecon da roko sub mian kubuton! Nun mi lasos vin du kune dum kelka tempo.

Tion dirinte Gandalfo reiris al la aliaj, kiuj plu staradis apud la ortanka ŝtono en ĝena meditado.

— Danĝero venis nokte, kiam malplej atendita, — li diris. — Ni apenaŭ eskapis!

— Kiel fartas la hobito Grinĉjo? — demandis Aragorno.

— Al mi ŝajnas, ke ĉio jam estos en ordo, — respondis Gandalfo. — Ne longe li estis tenata, kaj hobitoj posedas mirindan kapablon refortiĝi. La memoro, aŭ ties hororo, verŝajne velkos rapide. Eble tro rapide. Ĉu vi, Aragorno, prenu la ortankan ŝtonon por gardi? Ĝi estas tasko danĝera.

— Ja danĝera, sed ne al ĉiuj, — diris Aragorno. — Ekzistas iu, kiu rajtas pretendi ĝin. Ĉar tiu certe estas la *palantiro* de Ortanko el la trezorejo de Elendilo, tien metita de la reĝoj de Gondoro. Jam proksimiĝis mia horo. Mi prenos ĝin.

Gandalfo rigardis Aragornon kaj poste, surprizante la aliajn, levis la kovritan ŝtonon kaj riverencis ĝin prezentante.

— Ricevu ĝin, mastro! — li diris, — kiel garantiaĵon pri aliaj aferoj redonotaj. Sed se mi rajtas konsili al vi pri uzado de via propraĵo, ne uzu ĝin — ankoraŭ! Estu singarda!

— Ĉu mi agis haste aŭ malsingarde, atendante kaj prepariĝante dum tiom da longaj jaroj? — demandis Aragorno.

— Neniam ĝis nun. Do ne stumblu ĉe la vojfino, — respondis Gandalfo. — Sed almenaŭ tenu sekreta tiun ĉi aĵon. Vi kaj ĉiuj aliaj, kiuj staras ĉi tie! Antaŭ ĉio la hobito Peregrino ne sciu kie ĝi estas lokita. La mishumoro eble trafos lin denove. Ĉar ve! li mantuŝis kaj enrigardis ĝin, kio devis neniam okazi. Li devis ne tuŝi ĝin en Isengardo, kaj tie mi devis pli rapidi. Sed mia menso direktiĝis al Sarumano, kaj mi divenis la naturon de la ŝtono tro malfrue. Nur nun mi certiĝis pri ĝi.

— Jes, ne povas esti dubo, — diris Aragorno. — Finfine ni konas la ligon inter Isengardo kaj Mordoro, kaj kiel tiu funkciis. Multo estas klarigita.

— Strangajn potencojn havas niaj malamikoj, kaj strangajn malfortaĵojn! — diris Teodeno. — Sed delonge estas dirite: “ofte miso difektas mison”.

— Tio multfoje estis spertita, — diris Gandalfo. — Sed ĉi-foje ni estis strange bonŝancaj. Eble min savis de granda eraro tiu ĉi hobito. Mi pripensis, ĉu mi mem esploru tiun ŝtonon por eltrovi ties utilojn. Se mi farus tion, mi mem estus rivelita al li. Mi ne pretas por tia defio, se entute mi iam pretos. Sed eĉ se mi trovus la forton por min eligi, estus katastrofe, se li vidus min jam nun, ĝis venos la horo, kiam sekreteco ne plu helpos.

— Jam venis tiu horo laŭ mia opinio, — diris Aragorno.

— Ne ankoraŭ, — diris Gandalfo. — Restas mallonga periodo de dubo, kiun ni devas utiligi. Klare la Malamiko supozis, ke la ŝtono estas en Ortanko. Kial ne? Kaj ke sekve la hobito estas kaptito tie, devigita enrigardi la vitron, turmentate de Sarumano. Tiu malhela menso certe jam pleniĝis de la voĉo kaj vizaĝo de la hobito bonanticipe: eble necesos sufiĉe da tempo antaŭ ol li konstatos sian eraron. Ni devas kapti tiun tempon. Ni tro malhastis. Ni devas formoviĝi. La ĉirkaŭaĵo de Isengardo ne plu estas loko por restado. Mi tuj rajdos antaŭen kun Peregrino Tjuko. Estos por li pli bone ol kuŝi en la mallumo, dum aliaj dormas.

— Mi retenos Eomeron kaj dek rajdistojn, — diris la reĝo. — Ili rajdos kun mi matene. La ceteraj povos akompani Aragornon kaj rajdi tiel frue, kiel plaĉos al ili.

— Laŭ via plaĉo, — diris Gandalfo. — Sed hastu kiel eble plej rapide al la ŝirmo de la montetoj, al la Profundaĵo de Helmo!

Tiumomente kovris ilin ombro. La hela lunlumo ŝajnis abrupte forigita. Kelkaj rajdistoj ekkriis kaj kaŭris, tenante la brakojn super la kapoj, kvazaŭ por flankenturni baton de supre: blinda timego kaj morteca malvarmo inundis ilin. Kaŭrante ili rigardis supren. Grandega flugila figuro trapasis la lunon kvazaŭ nigra nubo. Ĝi giris kaj iris norden, flugante pli rapide ol ajna vento de Mez-Tero. Antaŭ ĝi la steloj velkis. Ĝi estis jam for.

Ili stariĝis rigidaj kiel ŝtonoj. Gandalfo rigardadis supren, kun la brakoj etenditaj suben malloze, la manoj pugnigitaj.

— Nazgulo! — li kriis. — Kuriero de Mordoro. La ŝtormo venas. La nazguloj jam trapasis la Grandan Riveron! Rajdu, rajdu! Ne atendu la tagiĝon! La rapiduloj ne atendu la lantulojn! Rajdu!

Li forsaltis, vokante Ombrofakson dum li kuris. Aragorno sekvis lin. Veninte al Grinĉjo, Gandalfo levis lin en brakojn.

— Vi akompanos min ĉi-foje, — li diris. — Ombrofakso montros al vi, kiel ĝi scias galopi. — Poste li kuris al sia dormloko. Ombrofakso jam staris tie. Ĵetinte la etan sakon, kiu estis lia sola pakaĵo, sur la ŝultrojn, la sorĉisto sursaltis la dorson de la ĉevalo. Aragorno levis Grinĉjon kaj metis lin en la brakumon de Gandalfo, volvitan per mantelo kaj lankovrilo.

— Adiaŭ! Sekvu rapide! — kriis Gandalfo. — Ek, Ombrofakso! La granda ĉevalo suprenĵetis la kapon. Ĝia flua vosto tikegis en la lunlumo. Poste ĝi saltis antaŭen, repuŝante la teron, kaj foriris kvazaŭ la norda vento el la montaro.

— Jen bela ripozplena nokto! — diris Gaja al Aragorno. — Iuj ĝuas bonŝancon mirindan. Tiu ne volis dormi, kaj li deziris rajdi kun Gandalfo. Kaj jen li iras! Anstataŭ esti ŝtonigita mem por eterne stari ĉi tie kiel avertilo.

— Se vi la unua levus la ortankan ŝtonon, sed ne li, kiel estus nun? — diris Aragorno. — Vi eble farus pli malbone. Kiu scias? Sed nun vi ŝancas akompani min, mi timas. Senprokraste. Iru pretiĝi kaj kunportu ĉion postlasitan de Grinĉjo. Rapide!

Trans la ebenaĵon rapidegis Ombrofakso, bezonante nek urĝon nek gvidon. Pasis malpli ol unu horo, kaj ili alvenis la Trapasejojn de Iseno kaj transiris ilin. La Monto de la Rajdistoj kaj ties fridaj lancoj kuŝis grizaj malantaŭ ili.

Grinĉjo plifortiĝis. Li sentis sin varma, sed la vento sur lia vizaĝo estis akra kaj freŝiga. Li estis kun Gandalfo. La hororo de la ŝtono kaj de la hida ombro antaŭ la luno velkis, aferoj postlasitaj en la montaj nebuletoj aŭ en pasema sonĝo. Li profunde enspiris.

— Mi ne sciis, ke vi rajdas sensele, Gandalfo, — li diris. — Nek selon nek bridon vi havas!

— Mi ne rajdas elfe krom sur Ombrofakso, — diris Gandalfo. — Sed Ombrofakso rifuzas jungaĵon. Oni ne rajdas Ombrofakson: ĝi volonte portas vin, aŭ ne portas. Se ĝi volas, tio sufiĉas. Tiam estas ĝia tasko certigi, ke vi restas sur ĝia dorso, krom se vi elsaltas en la aeron.

— Kiel rapide ĝi iras? — demandis Grinĉjo. — Rapide laŭ la trablovo, sed tre senperturbe. Kaj kiom malpezaj estas ĝiaj hufobatoj!

— Ĝi kuras nun tiel rapide, kiel kapablas la ĉevalo plej rapida galopi, — respondis Gandalfo, — sed tio ne estas rapida laŭ ĝia kriterio. La tereno iom supreniras ĉi tie, kaj estas pli malglata ol estis aliflanke de l' rivero. Sed vidu, kiel la Blankaj Montoj proksimiĝas sub la steloj! Jen estas la Trihirnaj montopintoj kvazaŭ nigraj lancoj. Postnelonge ni alvenos la disiĝajn vojojn kaj atingos la Profundan Kavaĵon, kie okazis la batalo antaŭ du noktoj.

Grinĉjo denove silentis kelkan tempon. Li aŭdis Gandalfon kanti al si, murmurantan mallongajn rimfragmentojn en multaj lingvoj, dum pasis sub ili la mejloj. Finfine la sorĉisto komencis kanton, kies vortojn la hobito komprenis: kelkaj versoj venis klare al liaj oreloj malgraŭ la siblado de la vento:

Altaj ŝipoj, altaj reĝoj,
tri-trioblo kvanta,
kion portis el la lando
trans la mar' fluanta?
Sep stelojn, sep ŝtonojn,
kaj unu arbon blankan.

— Kion vi recitas, Gandalfo? — demandis Grinĉjo.

— Mi nur ripetis mense kelkajn el la Sciorimoj, — respondis la sorĉisto. — Hobitoj supozeble forgesis ilin, eĉ tiujn, kiujn ili neniam konis.

— Ne, ne tute, — diris Grinĉjo. — Kaj ni havas multajn proprajn, kiuj eble ne interesus vin. Sed mi neniam aŭdis tiun ĉi. Pri kio temas: la sep steloj kaj sep ŝtonoj?

— Pri la *palantiroj* de la antikvaj reĝoj, — diris Gandalfo.

— Kaj kio ili estas?

— La nomo signifas *tio, kio rigardas malproksimen*. La ortanka ŝtono estis unu el ili.

— Do ĝin ne kreis, ne kreis... — Grinĉjo hezitis, — la Malamiko, ĉu?

— Ne, — diris Gandalfo. — Ankaŭ ne Sarumano. Ĝi superas lian arton kaj ankaŭ tiun de Saŭrono. La *palantiroj* devenas el ekster Okcidentio, el Eldamaro. Noldoroj kreis ilin. Mem Feanoro eble ellaboris ilin antaŭ tiom longe, ke la tempo ne estas mezurebla per jaroj. Sed ekzistas nenio, kion ne povas Saŭrono misuzi. Ve al Sarumano! Tio pereigis lin, kiel mi nun perceptas. Danĝeraj al ni ĉiuj estas la verkoj de arto pli profunda ol ni mem posedas. Tamen estas li, kiu devas akcepti la kulpigon. Stultulo! kiu tenis ĝin sekreta por sia propra profito. Neniun vorton li iam ajn diris pri ĝi al iu ajn el la Konsilio. Ne estis konate al ni, ke iu el la *palantiroj* eskapis el la ruinoj de Gondoro. Ekster la Konsilio oni eĉ ne memoris inter elfoj aŭ homoj, ke tiaj aĵoj iam ekzistis, krom nur en la Sciorimoj, konservitaj inter

la popolo de Aragorno.

— Riel ilin utiligis la antikvaj homoj? — demandis Grinĉjo, ĝoja kaj mirigata, ĉar li ricevas respondojn al tiom da demandoj, kaj scivolanta, kiom longe tio daŭros.

— Por vidi malproksimen, kaj por pense komunikiĝi unu kun alia. Tiel ili longe konservis kaj unuigis la regnon Gondoro. Ili starigis ŝtonojn en Minaso Anor kaj en Minaso Itil, kaj en Ortanko en la cirklo de Isengardo. La ĉefo kaj mastro de tiuj estis sub la Kupolo de Steloj en Osgiliado antaŭ ties ruiniĝo. La aliaj estis tre fore. Malmultaj nun scias kie, ĉar neniu rimo tion diras. Sed en la domo de Elrondo oni rakontas, ke ili estis en Anuminaso, Amono Sul, kaj la ŝtono de Elendilo estis sur la Turmontetoj, kiuj frontas al Mitlondo en la Ljuna Golfo, kie kuŝas la grizaj ŝipoj.

» Ĉiu *palantiro* parolis al ĉiuj aliaj, sed en Osgiliado oni povis trarigardi ĉiujn samtempe. Nun evidentiĝis, ke ĉar Ortanko kontraŭstaris la ŝtormojn de la tempo, sekve nur la *palantiro* de tiu turego restis. Sed sola ĝi povis nenion fari krom vidigi etajn bildojn pri aferoj malproksimaj kaj tagoj antaŭlongaj. Tio sendube estis tre utila al Sarumano, sed ŝajnas, ke li ne estis kontenta. Pli kaj pli malproksimen li rigardis ĝis lia rigardo trafis Baraduron. Tiam li estis kroĉita.

» Kiu scias, kie nun kuŝas ĉiuj aliaj ŝtonoj, frakasitaj, subterigitaj aŭ profunde dronigitaj? Sed almenaŭ unu Saŭrono verŝajne havigis al si kaj regis por siaj celoj. Mi konjektas ke tiu estas la Itila ŝtono, ĉar li antaŭlonge kaptis Minason Itil kaj igis ĝin loko misa: Minaso Morgul ĝi fariĝis.

» Estas jam facile diveni, kiel rapide la vaganta okulo de Sarumano estis kroĉita kaj retenita; kaj kiel ekde tiam li estas persvadita de fore, kaj timigita kiam persvado ne sufiĉis. La mordinto mordita, akcipitro sub krifo de aglo, araneo en ŝtala araneaĵo! Kiom longe, mi scivolas, li estas devigita veni ofte al sia vitraĵo por inspektado kaj instrukciado, kaj la ortanka ŝtono tiel kliniĝis al Baraduro, ke se iu, krom fortega volo, nun enrigardas ĝin, ĝi portas ties menson kaj vidkapablon tien rapide? Kaj kiel ĝi tiras al si! Ĉu mi ne spertis tion? Eĉ nun mia koro deziras provi per ĝi mian volforton por konstati, ĉu mi povus forkapti ĝin de li kaj turni ĝin laŭ mia volo: por rigardi trans la larĝajn marojn da akvo kaj da tempo al Tiriono la Bela, kaj percepti la neimageblajn manojn kaj menson de Feanoro kaj ties laborantoj, dum floris la Blanka kaj la Ora Arboj! Gandalfo suspiris kaj silentiĝis.

— Mi domaĝas, ke mi ne sciis anticipe ĉion ĉi, — diris Grinĉjo. — Mi tute ne konceptis tion, kion mi faris.

— Ho jes, vi konceptis, — diris Gandalfo. — Vi sciis, ke vi agas mise kaj stulte; kaj tion vi diris al vi, kvankam vi ne aŭskultis. Mi ne sciigis al vi pli frue ĉion ĉi, ĉar nur per meditado pri la okazintaĵoj mi fine ekkomprenis,

ĝuste dum ni rajdis kune. Sed se mi parolus pli frue, tio ne malpliigus vian deziron, nek igus ĝin pli rezistema. Male! Ne, instruas plej trafe la mano bruligita. Post tio la konsilo pri fajro iras rekte ĝis la koro.

— Vere, — diris Grinĉjo. — Se ĉiuj sep ŝtonoj estus dismetitaj nun antaŭ mi, mi fermus miajn okulojn kaj enpoŝigus miajn manojn.

— Bone! — diris Gandalfo. — Tion mi esperis.

— Sed mi ŝatus scii... — Grinĉjo komencis.

— Indulgon! — kriis Gandalfo. — Se liverado de informoj estu la kuracilo de via scivolemo, mi pasigos la ceteron de miaj tagoj respondante al vi. Kion pli vi volas scii?

— La nomojn de ĉiuj steloj kaj de ĉio vivanta, kaj la tutan historion de Mez-Tero kaj Super-Ĉielo kaj la Disigantaj Maroj, — ridis Grinĉjo. — Kompreneble! Kion malpli? Sed mi ne hastemas ĉi-nokte. Ĉi-momente mi scivolis nur pri la nigra ombro. Mi aŭdis vin krii: “Kuriero de Mordoro”. Kio estis tio? Kion ĝi povus fari ĉe Isengardo?

— Tiu estis Nigra Rajdanto flugilhava, nazgulo. Ĝi povus forkapti vin al la Malhela Turego.

— Sed ĝi ne venis pro mi, ĉu? — hezitis Grinĉjo. — Mi volas scii, ĝi ne sciis, ke mi...

— Kompreneble ne, — diris Gandalfo. — Temas pri ducent leŭgoj aŭ pli en rekta flugo de Baraduro ĝis Ortanko, kaj eĉ nazgulo bezonas kelkajn horojn por flugi de unu al la alia. Sed Sarumano certe enrigardis la ŝtonon post la orka invado, kaj pli el liaj sekretaj pensoj, mi ne dubas, estas legita, ol li intencis. Kuriero estas sendita por konstati, kion li faras. Kaj post tio, kio okazis hodiaŭ nokte, venos alia, ŝajnas al mi, kaj rapide. Do Sarumanon atingos la fina premo de la ŝraŭbtenilo, en kiun li metis sian manon. Li ne havas kaptiton sendeblan. Li ne havas ŝtonon per kiu vidi, kaj ne povas respondi al la alvoko. Saŭrono nur kredos, ke li forkaŝas la kaptiton kaj rifuzas utiligi la ŝtonon. Ne helpos Sarumanon sciigi la veron al la kuriero. Kvankam Isengardo estas ruinigita, tamen li plu restas sekura en Ortanko. Do ĉu li volas aŭ ne, li ŝajnos ribelulo. Tamen li rifuzis nin ĝuste por eviti tion! Kion li faros en tia problemo, mi ne scias. Li ankoraŭ kapablas, miaopinie, dum en Ortanko, rezisti la naŭ Rajdantojn. Li eble provos tion fari. Li eble provos kapti la nazgulon aŭ almenaŭ mortigi la aĵon, sur kiu li nun rajdas en la aero. Tiuokaze Rohano gardu siajn ĉevalojn! Sed mi ne scias, kiel tio elfalos, ĉu bone aŭ malbone por ni. Povos esti ke la projektoj de la Malamiko estos konfuzitaj, aŭ malhelpataj de lia kolero kontraŭ Sarumano. Povos esti, ke li ekscios, ke mi estis tie kaj staris sur la ŝtuparo de Ortanko kun hobitoj ĉevoste. Aŭ li ekscios, ke la heredanto de Elendilo estas viva kaj staris apud mi. Se Vermlangon ne trompis la rohanaj armoj, li

rekonos Aragornon kaj la titolon, kiun tiu pretendas. Tion mi plej timas. Kaj sekve ni fuĝas ne for el danĝero, sed en danĝeron pli grandan. Ĉiu paŝo de Ombrofakso proksimigas vin al la Lando de Ombro, Peregrino Tjuko.

Grinĉjo nenion respondis, sed kaptis sian mantelon, kvazaŭ trafus lin subita frosto. Griza tereno pasis sub ili.

— Vidu jam! — diris Gandalfo. — La ŭestfaldaj valoj malfermiĝas antaŭ ni. Ĉi tie ni revenas al la vojo orienten. Tiu malhela ombro estas la enirejo de la Profundaĵo de Helmo. Tiuvoje kuŝas Aglarondo kaj la Ekbrilaj Kavernoj. Pri ili ne demandu min. Demandu Gimlion, se vi renkontiĝos denove, kaj la unuan fojon vi eble ricevos respondon pli longan ol vi deziras. Vi ne vidos mem la kavernojn ĉi-vojaĝe. Baldaŭ ili longe malantaŭos.

— Mi pensis, ke vi intencas halti ĉe la Profundaĵo de Helmo! — diris Grinĉjo. — Kien vi do iros?

— Al Minaso Tirit, antaŭ ol la militŝtormoj ĉirkaŭos ĝin.

— Ho! Kaj kiom malproksima estas tio?

— Leŭgoj post leŭgoj, — respondis Gandalfo. — Trioble pli malproksime ol la loĝejoj de reĝo Teodeno, kaj tiuj situas pli ol cent mejlojn oriente de ĉi tie, laŭ la flugvojo de la kurieroj de Mordoro. Ombrofakso devos kuri laŭ vojo pli longa. Kiu pruviĝos pli rapida?

» Ni rajdos nun ĝis tagiĝo, kaj tio estos nur post kelkaj horoj. Tiam eĉ Ombrofakso devos ripozi, en iu kavaĵo sur la montetoj: ĉe Edoraso, mi esperas. Dormu, se vi povas! Vi eble vidos la unuan ekbrilon de aŭroro sur la ora tegmento de la domo de Eorlo. Kaj du tagojn poste vi vidos la purpuran ombron de Monto Mindoluino kaj la murojn de la turego de Denetoro, blankaj en la mateno.

» Jam ek, Ombrofakso! Kuru, bravkora, kuru tiel, kiel vi neniam antaŭe kuris! Nun ni alvenas la terenon, kie vi naskiĝis, kaj ĉiun ŝtonon vi konas. Kuru jam! En rapideco estas espero!

Ombrofakso suprenĵetegis la kapon kaj henis laŭte, kvazaŭ trumpeto vokus ĝin al batalo. Poste ĝi saltis antaŭen. Flagroj bloviĝis de liaj piedoj; nokto ĝin preterhastis.

Dum li malrapide endormiĝis, Grinĉjo spertis strangan senton: li kaj Gandalfo estis ŝtone senmovaj, sidantaj sur statuo de kuranta ĉevalo, dum la mondo forruliĝis sub liaj piedoj kun forta bruo de vento.

LA KVARA LIBRO

1. Tol Brandiro
2. Norda Itilio
3. Kairo Andros
4. Mindoluino

5. Osgiliado
6. Minaso Morgul
7. Cirito Ungol
8. Isenbuŝo
9. Linhiro

1

Malsovaĝigo de Smeagolo

Nu, mastro, ni sidas en kaĉo nemiskompreneble, — diris Sam Vato. Li staris deprimite kun kuntiritaj ŝultroj apud Frodo kaj rigardadis per la sulkigitaj okuloj en la krepuskon.

Estis la tria vespero post kiam ili fuĝis el la Kunularo, laŭ ilia proksimuma kalkulo: ili preskaŭ ne sciis precize, dum kiom da horoj ili grimpis kaj penis inter la dezertaj deklivoj kaj ŝtonoj de Emin Muilo, jen retroirante ĉar vojo antaŭen ne troveblis, jen konstatante, ke ili vagis cirkle reen al kie ili estis antaŭ horoj. Tamen entute ili ĉiam progresis orienten, restante laŭeble proksime al la ekstera rando de tiu stranga tordita nodaĵo da montetoj. Sed ĉiam ili trovis ties eksterajn facojn apikaj, altaj kaj nepaseblaj, brovumantaj super la suba ebenaĵo; trans ties malordaj flankoj kuŝis grizaj putrantaj marĉoj, kie nenio moviĝis kaj eĉ birdo ne estis videbla.

La hobitoj nun staris rande de alta klifo, nuda kaj dezerta, kies subaĵon volvis nebuleto; kaj malantaŭ ili leviĝis la krenelaj altejoj kronitaj per drivaj nuboj. Frosta vento blovis el la oriento. Nokto profundiĝis sur la senformaj terenoj antaŭ ili; ties malsaneca verdo velkis al malvigla brano. Tre malproksime dekstre Anduino, kiu dum la tago sporade ekbrilis dum ekaperoj de la suno, jam estis kaŝita en ombro. Sed iliaj okuloj ne direktiĝis trans la riveron, reen al Gondoro, al iliaj amikoj, al la homaj landoj. Suden kaj orienten ili rigardadis, kie rande de l' proksimiĝanta nokto pendis malhela linio kvazaŭ foraj montoj da senmova fumo. De tempo al tempo eta ruĝa ekardo flagris fore supren sur la rando de la tero kaj la ĉielo.

— Kia kaĉo! — diris Sam. — Tio estas la sola loko, el ĉiuj pri kiuj ni aŭdis, kiun ni ne volas vidi de pli proksime; kaj tio estas la sola loko, kiun ni klopodas alveni! Kaj ĝuste tien ni ne povas alveni, neniel. Ni sekvis tute malĝustan vojon, ŝajne. Ni ne povas descendi; kaj se ni tamen sukcesus, ni trovus tiun tutan terenon fetora marĉo, mi garantias. Fu! Ĉu vi flaras ĝin? — Li snufis la venton.

— Jes, mi flaras ĝin, — diris Frodo, sed li ne moviĝis, kaj liaj okuloj fikse rigardis, forgvatante al la malhela linio kaj la flagra flamo. — Mordoro! — li murmuris subvoĉe. — Se nepras tien iri, prefere veni tien rapide kaj fari finon! — Li tremegis. La vento estis frosta kaj tamen peza je odoro de frida putriĝo. Finfine li diris: — Nu, ni ne povas resti ĉi tie la tutan

nokton, senkonsidere pri la kaĉo. Ni devas trovi lokon pli ŝirmatan por bivaki; kaj eble alia tago montros al ni vojon.

— Aŭ alia kaj alia kaj alia, — murmuris Sam. — Aŭ eble neniu tago. Ni venis laŭ malĝusta vojo.

— Mi scivolas, — diris Frodo. — Mia sorto estas, ŝajnas al mi, iri ĝis tiu jena Ombro, do la vojo estos trovita. Sed ĉu montros ĝin al mi bono aŭ miso? Nia sola eta espero troviĝis en rapideco. Prokrasto donas avantaĝon al la Malamiko, kaj jen mi estas: malhelpata. Ĉu nin gvidas la volo de la Malhela Turego? Ĉiuj niaj elektoj pruviĝis missortaj. Mi devis forlasi la Kunularon multe pli frue, kaj proksimiĝi el la nordo, oriente de l' rivero kaj de Emin Muilo, kaj tiel trans la malmolon de Ebenaĵo Batala ĝis la pasejoj de Mordoro. Sed nun ne eblas, ke vi kaj mi solaj trovu vojon returne, kaj la orkoj spionvagadas sur la orienta bordo. Ĉiu tago pasanta estas valora tago perdita. Mi estas laca, Sam. Mi ne scias, kio estas farebla. Kiom da manĝaĵo restas al ni?

— Nur tiu, kiel ĝi nomiĝas, *lembaso*, sinjoro Frodo. Sufiĉa kvanto. Sed ĝi estas pli bona ol nenio, tre longe manĝebla. Tion mi ne supozis tamen, kiam mi la unuan fojon puŝis en ĝi denton, ke iam estontece mi ekdeziros alternativon. Sed nun mi ja: pecon da ordinara pano, kaj kruĉon — vere, duonkruĉon — da biero, tion mi volonte glutus. Mi trenis miajn kuirilojn la tutan vojon ekde nia lasta bivakaro, kaj kiom tio profitis? Nenio por krei fajron, unuavice, kaj nenio por kuiri, eĉ ne herbo!

Ili forturniĝis kaj descendis en ŝtonozan kavaĵon. La subiranta suno estis kaptita en nuboj, kaj nokto venis rapide. Ili dormis tiel bone kiel eblis en la malvarmo, laŭvice, en angulo inter grandaj seg-randaj pinakloj el vetertrivita roko; almenaŭ ili estis ŝirmataj kontraŭ la orienta vento.

— Ĉu vi denove vidis ilin, sinjoro Frodo? — demandis Sam, dum ili sidis rigidaj kaj frostaj, maĉante oblatojn da *lembaso* en la malvarma grizo de la frua mateno.

— Ne, — diris Frodo. — Mi aŭdis nenion kaj vidis nenion jam dum du noktoj.

— Ankaŭ mi ne, — diris Sam. — Grrr! Tiuj okuloj ja nervozigis min! Sed eble ni finfine forskuis lin, tiun mizeran kaŝiranton. Golumo! Mi havigos al li *golumon* en la gorĝo, se mi iam intermanigos lian kolon.

— Mi esperas, ke tio neniam necesos, — diris Frodo. — Mi ne scias, kiel li sekvis nin; sed povas esti ke li reperdis nin, kiel vi diras. En tiu ĉi seka dezerta lando ne povas esti, ke ni lasas multajn spurojn, ankaŭ ne multan odoron, eĉ por lia snufa nazo.

— Mi esperas, ke tia estas la afero, — diris Sam. — Mi volas, ke ni liberiĝu de li porĉiame!

— Ankaŭ mi, — diris Frodo, — sed ne li estas mia ĉefa ĝeno. Mi volas, ke ni liberiĝu de jenaj montetoj! Mi malamegas ilin. Mi sentas min nuda oriente, malhelpate ĉi tie kun nenio krom la mortaj plataĵoj inter mi kaj la jena Ombro. En ĝi estas Okulo. Ek al! Nepras, ke ni iel malsupreniru hodiaŭ.

Sed tiu tago pasadis, kaj kiam posttagmezo velke proksimiĝis al vespero, ili ankoraŭ grimpis laŭlonge de la firsto kaj trovis nenian elirvojon.

Kelkfoje en la silento de tiu dezerto ili ŝajne aŭdis mallaŭtajn bruetojn malantaŭe, ŝtoneton falantan, aŭ imagitan paŝon de frapantaj piedoj sur la rokaĵo. Sed se ili haltis kaj staris aŭskultante, ili nenion plu aŭdis, nenion krom la vento susuranta trans la randojn de la ŝtonoj; tamen eĉ tio memorigis al ili spiron mallaŭte siblantan inter akraj dentoj.

Dum tiu tuta tago la ekstera rando de Emin Muilo kurbiĝis iom-post-iom norden, dum ili penis antaŭen. Sur ĝia ekstremaĵo jam etendiĝis larĝa malorda plataĵo el striita kaj vetermodifita rokaĵo, kiun interrompis de tempo al tempo tranĉeosimilaj ravinetoj, kiuj deklivis apike suben al profundaj fendaĵoj sur la klifosurfaco. Por trovi vojon tra tiuj fendaĵoj, kiuj estiĝis ĉiam pli profundaj kaj pli oftaj, Frodo kaj Sam estis pelitaj maldekstren, tre fore de la rando, kaj ili ne rimarkis, ke dum pluraj mejloj ili iradas malrapide sed seninterrompe suben: la supraĵo de la klifo sinkadis al la nivelo de la suba tereno.

Finfine ili estis haltigitaj. La firsto pli abrupte kurbiĝis norden kaj estis tratranĉita de ravino pli profunda. Aliflanke ĝi denove baŭmis supren, tra multaj klaftoj unusalte: granda griza klifo minacis antaŭ ili, tranĉita apike suben kvazaŭ de tranĉila bato. Ili ne plu povis iri antaŭen kaj devis turniĝi okcidenten aŭ orienten. Sed okcidenten nur kondukis ilin al pli da peno kaj prokrasto, reen al la kerno de la montaro; orienten kondukis ilin al la ekstera krutegaĵo.

— Nenio alia eblas ol suben grimpi laŭ tiu ĉi ravineto, Sam, — diris Frodo. — Ni vidu ĝis kio ĝi kondukas!

— Ĝis malagrabla falebleco, mi vetas, — diris Sam.

La fendaĵo estis pli longa kaj pli profunda ol ĝi aspektis. Iom longe sube ili trovis plurajn torditajn kaj stumpajn arbojn, la unuajn kiujn ili jam de kelkaj tagoj vidis: plejparte torditajn betulojn, kun jen kaj jen abioj. Multaj estis mortintaj kaj skeletaj, ĝiskerne morditaj de la orientaj ventoj. Iam en epoko pli milda certe estis atentinda densejo en la ravino, sed nun post eble kvindek paŝoj la arboj ĉesis, kvankam malnovaj rompitaj stumpoj displuiĝis preskaŭ ĝis la rando de la klifo. La subo de la fendegaĵo, kiu kuŝis laŭlonge de rokfendeta ekstremaĵo, estis raspa pro rompitaj ŝtonoj kaj deklivis apike suben. Kiam ili finfine alvenis ĝian finon, Frodo kaŭris kaj kliniĝis antaŭen.

— Vidu! — li diris. — Ni certe malsupreniris longe, aŭ la klifo sinkis. Ĝi estas multe malpli alta ĉi tie ol antaŭe, kaj ĝi aspektas ankaŭ pli facila.

Sam surgenuiĝis apude kaj malvolonte rigardis trans la randon. Poste li ekrigardis supren al la baŭmanta klifego je ilia maldekstro.

— Ĉu pli facila? — li gruntis. — Nu, supozeble ĉiam pli facilas iri suben ol supren. Kiu ne scias flugi, tiu povas salti!

— Ĝi estus ankoraŭ longa salto, — diris Frodo. — Proksimume, nu... — li stariĝis momente, mezurante ĝin per la okuloj —...proksimume dek ok klaftojn, mi supozas. Ne pli.

— Kaj tio sufiĉas! — diris Sam. — Aĥ! Kiom mi malŝatas suben rigardi de sur altaĵo! Sed rigardado pli preferindas ol grimpado.

— Malgraŭ tio, — diris Frodo, — mi opinias, ke eblas grimpi suben ĉi tie; kaj mi opinias, ke ni devos provi. Vidu, la rokaĵo tre malsimilas tion, kio ĝi estis antaŭ kelkaj mejloj. Ĝi glitis kaj fendiĝis.

La ekstera surfaco ja ne plu estis tiel apika kaj iomete deklivis antaŭen. Ĝi aspektis kiel granda remparo aŭ marmuro, kies fundamento moviĝis, tiel ke ĝiaj tavoloj estis tute torditaj kaj malordigitaj, lasante grandajn fendojn kaj longajn oblikvajn randojn, kiuj kelkloke larĝis kiel ŝtupoj.

— Kaj se temas pri descendo, ni prefere provu tuj. Mallumiĝas frue. Ŝajnas al mi, ke venos ŝtormo.

La fumeca malklaro de la montoj oriente perdiĝis en nigro pli profunda, kiu jam etendiĝis per longaj brakoj okcidenten. Fora murmuro de tondro portiĝis sur la kreskanta venteto. Frodo snufis la aeron kaj rigardis dubeme al la ĉielo. Li zonis sian mantelon, striktigis la zonon kaj ĝustigis surdorse sian malpezan tornistron; poste li ekpaŝis al la rando.

— Mi intencas provi tion, — li diris.

— Tre bone! — diris Sam morne. — Sed mi iros la unua.

— ĉu vi? — diris Frodo. — Kio igis vin ŝanĝi vian opinion pri grimpado?

— Mian opinion mi ne ŝanĝis. Sed estas sagace meti pli malalten tiun, kiu pli probable forglitos. Mi ne volas fali sur vin kaj forbati vin — ne sagace estus mortigi du per unu falo.

Antaŭ ol Frodo povis malhelpi lin, li sidiĝis, svingis la krurojn trans la randon, kaj turnis sin, serĉante per palpetado piedapogon. Dubinde, ĉu li iam faris neekscitite ion pli kuraĝan, aŭ pli malsaĝan.

— Ne, ne! Sam, olda azeno! — diris Frodo. — Vi certe mortigos vin, transirante tiel, ne rigardante eĉ por vidi kien celi. Revenu! — Li kaptis Samon sub la akseloj kaj denove tiris lin supren. — Nun atendu iom kaj paciencu! — li diris. Poste li kuŝiĝis sur la teron, kliniĝante antaŭen kaj rigardante suben; sed la lumo ŝajnis rapide velkanta, kvankam la suno

ankoraŭ ne subiris. — Al mi ŝajnas, ke tion ni povus kapabli. Ĉiuokaze mi povus; kaj ankaŭ vi povus, se vi malpanikiĝus kaj zorge sekvus min.

— Mi ne scias, kiel vi povas tiom certi, — diris Sam. — Ha! Per tiu ĉi lumo vi ne povas vidi ĝis la fundo. Kio se vi alvenos lokon, kie nenien meteblas la manoj aŭ piedoj?

— Mi regrimpu supozeble, — diris Frodo.

— Facile direbla, — kontraŭdiris Sam. — Prefere atendi la matenon kaj pli da lumo.

— Ne! Ne, se tion mi povas, — diris Frodo kun subita stranga emfazego. — Mi domaĝas ĉiun horon, ĉiun minuton. Mi subeniros provi. Ne sekvu ĝis mi revenos aŭ alkrios!

Kroĉante sin al la ŝtona rando de la klifo per siaj fingroj, li malabrupte subenigis sin ĝis, kiam liaj brakoj estis preskaŭ plene elstreĉitaj, liaj piedfingroj trovis breteton.

— Unu paŝon sube! — li diris. — Kaj tiu ĉi breteto plilarĝiĝas dekstre. Mi povus stari tie senkroĉe. Mi... — liaj vortoj fortranĉiĝis.

La hasta mallumo, jam ege ekrapidanta, alkuris el la oriento kaj englutis la ĉielon. Aŭdiĝis supre seka fenda tondrobruo. Brula fulmo subenbatiĝis en la montetaron. Poste venis frapo de sovaĝa vento, kaj kun ĝi, enmiksiĝante en ties blekego, venis alta akra kriĉo. La hobitoj aŭdis ĝuste tian krion fore en Mariŝo, dum ili fuĝis el Hobiturbo, kaj eĉ tie en la arbaroj de la Provinco ĝi frostigis ilian sangon. Ĉi tie ekstere en la dezerto ĝia teruro estis multe pli forta: ĝi trapikis ilin per fridaj klingoj de hororo kaj malespero, haltigante la koron kaj la spiron. Sam falis vizaĝaltere. Senintence Frodo malkroĉiĝis kaj metis la manojn al sia kapo kaj la oreloj. Li ŝanceliĝis, glitis kaj glisis suben kun vekrio.

Sam aŭdis lin kaj pene rampis ĝis la rando.

— Mastro, mastro! — li vokis. — Mastro!

Neniun respondon li aŭdis. Li konstatis, ke li tremas ĉiumembre, sed li koncentrigis sian spiron kaj denove kriis:

— Mastro!

La vento ŝajnis retroblovi la voĉon en lian gorĝon, sed kiam ĝi pasis, blekante tra la ravineto kaj foren tra la montetoj, mallaŭta responda krio atingis liajn orelojn:

— En ordo, en ordo! Mi estas ĉi tie. Sed vidi mi ne povas. Frodo vokis feblavoĉe. Li ja ne estis tre malproksima. Li glisis, sed ne falis kaj trafis abrupte per la piedoj breteton pli larĝan ne multajn paŝojn sube. Feliĉe la rokfaco tiuloke kliniĝis sufiĉe malantaŭen, kaj la vento premis lin al la klifo, tiel ke li ne falis antaŭen. Li iom ekregis sin, apogante sian vizaĝon al la malvarma ŝtono, sentante bategadon de sia koro. Sed aŭ la mallumo

definitiviĝis, aŭ liaj okuloj ĉesis vidi. Ĉio ĉirkaŭ li estis nigra. Li scivolis, ĉu li blindiĝis. Li profunde enspiris.

— Revenu! revenu! — li aŭdis la voĉon de Sam el la nigro supre.

— Mi ne povas, — li diris. — Mi ne povas vidi. Mi ne povas trovi kroĉejon. Mi ankoraŭ ne povas moviĝi.

— Kion mi faru, sinjoro Frodo? Kion mi faru? — kriis Sam, alkliniĝante vere danĝere. Kial lia mastro ne povas vidi? Estis malhele, certe, sed ne komplete mallume. Li povis vidi Frodon sube, grizan forlasitan figuron dispuŝitan al la klifo. Sed li estis tro fore atingebla de ajna helpa mano.

Aŭdiĝis alia tondrobruo, kaj poste venis la pluvo. Kiel blindiga kovrilo hajlomiksita ĝi peliĝis kontraŭ la klifon, frostige malvarma.

— Mi venos malsupren al vi, — kriis Sam, kvankam kiel li esperis tiamaniere helpi li ne scius diri.

— Ne, ne! Atendu! — Frodo revokis, jam pli malfeble. — Mi saniĝos baldaŭ. Mi jam sentas min pli bone. Atendu! Vi nenion povas fari sen ŝnuro.

— Ŝnuro! — kriis Sam, parolante agitite al si pro ekscitiĝo kaj malŝarĝiĝo. — Nu, ĉu mi ne meritas esti pendumita ŝnurofine kiel averto al ŝtipokapuloj! Vi estas nenia alia ol klapomankulo, Sam Vato: tion diris al mi sufiĉe ofte la Avulo, ĉar tio estis vorto ŝatata de li. Ŝnuro!

— Ĉesu babilaĉi! — kriis Frodo, jam sufiĉe refortiĝinta por sperti tiel amuziĝon kiel senpaciencon. — Lasu pri via Avulo! Ĉu vi provas informi vin, ke iom da ŝnuro vi havas en la poŝo? Se jes, diru tion!

— Jes, sinjoro Frodo, en mia tornistro, ĉu ne. Mi portis ĝin tra centoj da mejloj, kaj tion mi komplete forgesis!

— Do ekagu kaj malsuprenigu ties finon!

Rapide Sam formetis sian tornistron kaj palpserĉis en ĝi. Jen efektive ĉe la fundo estis volvaĵo de la silke griza ŝnuro farita de la popolo de Lorieno. Li ĵetis finon al sia mastro. La mallumo ŝajnis leviĝi for de l' okuloj de Frodo, aŭ eble revenis lia vidpovo. Li povis vidi la grizan linion subenpendanta, kaj al li ŝajnis, ke ĝi havas silkan rebrilon. Jam havante punkton en la mallumo al kiu li direktu sian rigardon, li sentis sin malpli kapturna. Klinante antaŭen sian pezon, li ligis la finon ĉirkaŭ sian talion kaj poste li kaptis ambaŭmane la ŝnuron.

Sam retropaŝis kaj krampis siajn piedojn per stumpo unu-du paŝojn for de la rando. Duone trenite, duone grimpante, Frodo supreniris kaj ĵetis sin teren.

Tondro graŭlis kaj muĝis en malproksimo, sed la pluvo daŭre falis abunde. La hobitoj rampis retro al la ravino, sed tie ili ne trovis multe da ŝirmo. Rojetoj da akvo komencis flui suben; baldaŭ tiuj iĝis inundo, kiu

plaŭdis kaj nebuletis sur la ŝtonoj, kaj elsputiĝis trans la klifon kvazaŭ defluiloj sur vasta tegmento.

— Mi duondronus tie sube, aŭ tute forviŝiĝus, — diris Frodo. — Kiel bonŝance, ke vi havis tiun ŝnuron!

— Pli bonŝance se mi pensus pri ĝi pli frue, — diris Sam. — Eble vi memoras, ke ili metis tiujn ŝnurojn en la boatojn, kiam ni ekvojaĝis: en la elfa lando. Tio ekplaĉis al mi, kaj mi kaŝis volvaĵon en mia tornistro. Antaŭ jaroj, tio ŝajnas. "Eble tio helpos je multaj bezonoj", — li diris: Haldiro, aŭ iu el tiu popolo. Kaj li diris prave.

— Domaĝe, ke mi ne pensis kunporti alian pecon, — diris Frodo; — sed mi forlasis la Kunularon tiel haste kaj konfuzite. Se ni nur posedus sufiĉon, ni povus utiligi ĝin por malsupreniri. Kiom longas via ŝnuro, mi scivolas?

Sam elmetis ĝin malrapide, mezurante ĝin per la brakoj:

— Kvin, dek, dudek, tridek ulnoj, pli malpli, — li diris.

— Kiu supozus tion! — Frodo ekkriis.

— Ha, kiu? — diris Sam. — Elfoj estas mirindaj personoj. Ĝi aspektas iom maldika, sed ĝi estas fortika; kaj mola kiel lakto en la mano. Ankaŭ enpakiĝas dense kaj ekstreme malpezas. Mirinda popolo, efektive.

— Tridek ulnoj! — diris Frodo pripensante. — Mi opinias, ke sufiĉos. Se la ŝtormo forpasos antaŭ la noktiĝo, mi provos ĝin.

— La pluvo jam preskaŭ ĉesis, — diris Sam, — sed ne entreprenu denove ion riskan en la krepusko, sinjoro Frodo! Kaj mi ankoraŭ ne retrankviliĝis post tiu kriĉo en la vento, eĉ se vi ja. Kiel Nigra Rajdanto ĝi sonis — sed supre en la aero, se ili scias flugi. Al mi ŝajnas, ke prefere ni ripozu en tiu fendaĵo ĝis forpasos la nokto.

— Kaj al mi ŝajnas, ke mi rifuzas pasigi unu momenton pli ol necesas, haltigite sur tiu ĉi breto dum la okuloj de la Malluma Lando rigardas trans la marĉojn, — diris Frodo.

Tion dirinte, li stariĝis kaj aliris ree la fundon de la ravineto. Li elrigardis. Klara ĉielo disvolviĝis denove en la oriento. La periferioj de la ŝtormo leviĝis ĉifonaj kaj malsekaj, kaj la ĉefa turbulo jam pasis por etendi siajn flugilegojn super Emin Muilo, sur kiu la malhela pensado de Saŭrono meditis kelkan tempon. De tie ĝi turniĝis, batante la valon de Anduino per hajlo kaj fulmo, kaj ĵetante sian ombron sur Minason Tirit kun minaco pri milito. Poste, minacante inter la montoj kaj proksimigante siajn grandajn pintkolonojn, ĝi plu ruliĝis lante tra Gondoro kaj la periferioj de Rohano ĝis en malproksimo la rajdistoj sur la ebenaĵo vidis ĝiajn nigrajn kolonojn moviĝantaj malantaŭ la sunon dum ili rajdadis okcidenten. Sed tie ĉi super la dezerto kaj la fetoraj marĉoj la profunde blua vespera ĉielo malfermiĝis ankoraŭfoje, kaj kelkaj palaj steloj aperis kvazaŭ blankaj truetoj sur la

baldakeno super la falĉilforma luno.

— Estas bele kapabli denove vidi, — diris Frodo, profunde spirante. — Ĉu vi scias, ke mi dum kelka tempo supozis, ke mi perdis mian vidpovon? Pro la fulmo aŭ io pli malbona. Mi povis vidi nenion, tute nenion, ĝis descendis la griza ŝnuro. Ĝi ŝajnis iel briletadi.

— Ĝi efektive aspektas arĝentece en la malhelo, — diris Sam. — Mi neniam rimarkis tion pli frue, kvankam laŭ mia memoro mi neniam eligis ĝin de Mam mi ĝin kaŝis. Sed se vi firme emas grimpi, sinjoro Frodo, kiel vi intencas utiligi ĝin? Tridek ulnoj, aŭ ni diru ĉirkaŭ dek ok klaftoj: tio ne estas pli ol via konjekto pri la alteco de la klifo.

Frodo iom meditis.

— Ligu ĝin sekure al tiu stumpo, Sam! — li diris. — Poste, mi opinias, ke vi ĉi-foje realigos vian deziron kaj iros la unua. Mi mallevos vin, kaj ne necesos al vi fari pli ol uzi viajn piedojn kaj manojn por forigi vin de la roko. Kvankam, se vi metos vian pezon sur kelkajn el la bretetoj kaj ripozigos min, tio helpos. Kiam vi estos sube, mi sekvos. Mi nun sentas min sufiĉe refortiĝinta.

— En ordo, — diris Sam base. — Se devas esti, ni faru ĝin tuj! — Li levis la ŝnuron kaj ligis ĝin sekure al la stumpo plej proksima al la rando; poste la alian finon li ligis ĉirkaŭ la propra talio. Malvolonte li turnis sin kaj pretiĝis transiri la randon duafoje.

Tamen ne rezultis eĉ duone tiel malbone, kiel li atendis. La ŝnuro ŝajnis havigi al li memfidon, kvankam li pli ol unufoje fermis siajn okulojn, kiam li rigardis suben inter la piedoj. Troviĝis unu loko maloportuna, kie mankis breteto kaj la klifo estis vertikala kaj eĉ retroklinita iomete; tie li glitis kaj elsvingiĝis sur la arĝenta fadenego. Sed Frodo mallevis lin malrapide kaj zorgeme, kaj finfine ĉio finiĝis. Lia ĉefa timo estis, ke la ŝnurlongo elĉerpiĝos dum li ankoraŭ altas, sed restis pli kontentiga longo en la manoj de Frodo, kiam Sam atingis la fundon kaj alvokis:

— Mi alvenis!

Lia voĉo klare ascendis de sube, sed Frodo ne povis vidi lin; lia griza elfa mantelo mergiĝis kun la krepusko.

Frodo okupis iom pli da tempo sekvante lin. La ŝnuro ĉirkaŭis lian talion kaj estis sekure ligita supre, kaj li mallongigis ĝin tiel ke ĝi haltigus lin antaŭ ol li atingus la fundon; li tamen ne volis riski pri falo, kaj li ne tute dividis la fidon de Sam pri tiu svelta griza fadenego. Malgraŭ tio li trafis du lokojn, kie li devis tute sin doni al ĝi: glataj surfacoj, kie mankis teneblo eĉ por liaj fortaj hobitaj fingroj kaj la bretetoj estis diste apartaj. Sed finfine ankaŭ li surfundiĝis.

— Nu, — li kriis. — Ni sukcesis! Ni eskapis de Emin Muilo! Kaj kio

nun, mi scivolas? Eble ni baldaŭ sopiros ree fidindan duran rokon sub la piedoj.

Sed Sam ne respondis. Li rigardis supren laŭ la klifo.

— Klapomankuloj! — li diris. — Napokapoj! Mia bela ŝnuro! Jen ĝi estas ligita al stumpo, kaj ni ĉe la fundo. Ĝuste bela ŝtupareto por tiu ŝlima Golumo, kiun ni postlasas. Ne forgesu starigi vojindikilon por informi, kien ni iris! Mi taksis tion iom tro facila.

— Se vi kapablas elpensi metodon kaj por uzi la ŝnuron kaj por tamen kunporti ĝin, tiam vi rajtas transigi al mi la klapomankulon aŭ ajnan alian nomon, direktitan al vi de la Avulo, — diris Frodo. — Suprengrimpu kaj malligu ĝin kaj subenigu vin, se tion vi deziras!

Sam gratis sian kapon.

— Ne, mi ne imagas kiel, pardonpete, — li diris. — Sed al mi ne plaĉas postlasi ĝin, jen fakto. — Li karesis la ŝnuron kaj skuis ĝin milde. — Malagrablas disiĝi de io ajn kunportita el la elfa lando. Eble kreis ĝin Galadriela, cetere. Galadriela, — li murmuris, morne kapjesante. Li suprenrigardis kaj tiris lastfoje la ŝnuron kvazaŭ adiaŭe.

Komplete surprizante ambaŭ hobitojn, ĝi malligiĝis. Sam renversiĝis, kaj la longaj grizaj volvaĵoj glisis silente suben sur lin. Frodo ridis:

— Kiu ligis la ŝnuron? Bone, ke ĝi eltenis tiom longe! Konsterne, ke mi konfidis al via nodo mian tutan pezon.

Sam ne ridis.

— Mi eble ne tre kompetentas pri grimpado, sinjoro Frodo, — li diris ofendite, — sed mi iom kompetentas pri ŝnuroj kaj pri nodoj. Tio estas familia afero, oni povas diri. Vidu, mia avo, kaj post li mia onklo Andio, kiu estis la plejaĝa frato de la Avulo, posedis dum multaj jaroj ŝnurfarejon apud Tajkampo. Kaj mi tiel sekure kroĉis la stumpon, kiel povus iu ajn, ĉu en ĉu ekster la Provinco.

— Do devas esti, ke la ŝnuro rompiĝis — frotite per la rokrando atendeble.

— Mi vetas, ke ne! — diris Sam eĉ pli ofendite. Li kliniĝis kaj esploris la finojn. — Ĝi ne frotiĝis. Eĉ neniu plektero!

— Do, mi timas, ke devas temi pri la nodo, — diris Frodo. Sam skuis sian kapon kaj ne respondis. Li pasigis penseme la ŝnuron tra siaj fingroj.

— Kredu kion vi volas, sinjoro Frodo, — li diris finfine, — sed mi opinias, ke la ŝnuro malligiĝis propravole, kiam mi ĝin alvokis. — Li volvis ĝin ameme kaj stivis ĝin en la tornistron.

— Ĝi certe venis, — diris Frodo, — kaj jen la ĉefaĵo. Sed nun ni devas pripensi nian sekvan paŝon. Nokto baldaŭ alvenos. Kiel belaj estas la steloj kaj la luno!

— Ili ja feliĉigas la koron, ĉu ne? — diris Sam, suprenrigardante.

— Elfecaj ili estas, iel. Kaj la luno kreskas. Ni ne vidis ĝin jam de du-tri noktoj dum tiu ĉi nuboplena vetero. Ĝi komencas havigi notindan lumon.

— Jes, — diris Frodo, — sed ĝi ne estos plena dum ankoraŭ pluraj tagoj. Mi opinias, ke ni ne provu la marĉojn en lumo de duona luno.

Sub la unuaj noktombroj ili komencis la postan stadion de sia vojaĝo. Post iom da tempo Sam turnis sin kaj retrorigardis al la trapasita vojo. La elirejo de l' ravineto estis nigra noĉo en la malhela klifo.

— Mi ĝojas, ke ni havas la ŝnuron, — li diris. — Ni ĉiuokaze starigis etan problemon por tiu vojrabisto. Li provu sur tiuj bretetoj siajn frapajn fipiedojn!

Ili paŝis zorgeme for de la klifosubo, en dezerto de rokoj kaj malglataj ŝtonoj, malsekaj kaj glitigaj pro la peza pluvo. La tereno ankoraŭ abrupte fordeklivis. Ili ne tre longe iris, kiam ili malkovris grandan fendaĵon subite oscedantan nigre antaŭ iliaj piedoj. Ĝi ne estis larĝa, sed ĝi tro larĝis por transsalto en la malhela lumo. Al ili ŝajnis, ke ili aŭdas glugladon de akvo en ĝia profundo. Maldekstre ĝi forkurbiĝis norden, retro al la montetoj, kaj tiel baris al ili la vojon tiudirekte, almenaŭ en la periodo de mallumo.

— Prefere ni serĉu vojon suden laŭ la linio de la klifo, ŝajnas al mi, — diris Sam. — Ni eble trovos tie niĉon aŭ eĉ kavernon aŭ simile.

— Supozeble jes, — diris Frodo. — Mi estas laca, kaj mi opinias, ke mi ne kapablas longe plu grimpaĉi inter ŝtonoj hodiaŭ nokte, kvankam mi domaĝas la prokraston. Mi volas, ke estu klara pado antaŭ ni: tiuokaze mi daŭrigus ĝis miaj kruroj kolapsus.

Ili ne progresis pli facile ĉe la malebena subo de Emin Muilo. Sam ankaŭ ne trovis niĉon aŭ kavaĵon por ŝirmi sin: nur nudajn ŝtonozajn deklivojn albrovumatajn de la klifo, kiu jam denove leviĝis pli alte kaj pli apike, dum ili retroiris. Finfine, elĉerpite, ili simple ĵetis sin surteren malantaŭ rokego kuŝanta ne malproksime de la subo de la krutegaĵo. Tie dum kelka tempo ili sidis mizere kunpremite en la malvarma ŝtoneca nokto, dum dormo ektrafis ilin spite al ĉio, kion ili povis fari por rifuzi ĝin. La luno nun ŝvebis alta kaj klara. Ties maldensa blanka lumo lumigis la facojn de la rokoj kaj inundis la fridajn malridajn murojn de la klifo, igante la tutan baŭman mallumon frosta pala grizo trastrekita de nigraj ombroj.

— Nu, — diris Frodo, stariĝante kaj ĉirkaŭvolvante sin pli strikte per sia mantelo. — Dormu iomete, Sam, kaj prenu mian lankovrilon. Mi marŝos sentinele dum kelka tempo. — Subite li rigidiĝis, kliniĝinte kaptis la brakon de Sam kaj flustris: — Kio estas tio? Rigardu tien ĉe la klifo!

Sam rigardis kaj akre enspiris tra la dentoj.

— Ssss! — li diris. — Jen kio ĝi estas. Estas tiu Golumo! Serpentoj kaj

vipuroj! Kaj imagu, ke mi supozis perpleksi lin per nia grimpeto! Rigardu lin! Kvazaŭ fia rampa araneo sur muro.

Suben laŭ la surfaco de krutegaĵo, kiu aspektis apika kaj preskaŭ glata en la pala lunlumo, eta nigra figuro moviĝis kun disetenditaj membroj. Eble ĝiaj molaj kroĉiĝemaj manoj trovadis fendetojn kaj elstaraĵojn, kiujn neniu hobito povus vidi aŭ utiligi, sed ĝi aspektis kvazaŭ ĝi simple subenrampus per gluecaj kusenetoj, kvazaŭ ia granda ŝteliranto insektspeca. Kaj ĝi descendis kaposuben, kvazaŭ ĝi elflarus la vojon. De tempo al tempo ĝi levis malrapide la kapon, komplete returnante ĝin sur la longa maldikega kolo, kaj la hobitoj ekvidis du palajn brilantajn lumetojn, la okulojn kiuj palpebrumis momente al la luno kaj poste rapide rekovriĝis palpebre.

— Ĉu vi opinias, ke li vidas nin? — demandis Sam.

— Mi ne scias, — diris Frodo kviete, — sed mi kredas, ke ne. Nur malfacile eĉ amikaj okuloj vidas ĉi elfajn mantelojn: mi ne povas vidi vin en ombro eĉ je kelkaj paŝoj. Kaj mi aŭdis, ke li ŝatas nek sunon, nek lunon.

— Do kial li malsupreniĝas ĝuste ĉi tie? — demandis Sam.

— Kviete, Sam! — diris Frodo. — Li flaras nin, eble. Kaj li aŭdas tiel akre kiel la elfoj, laŭdire. Mi opinias, ke li jam aŭdis ion: niajn voĉojn verŝajne. Ni multe kriadis tie malantaŭe; kaj ni paroladis multe tro laŭte ĝis antaŭ minuto.

— Nu, mi tediĝis de li, — diris Sam. — Li alvenis unu fojon tro laŭ mi, kaj mi iros diri ion al li, se mi povos. Supozeble ni jam ne povus eskapi de li ĉiuokaze. — Tirinte la grizan kapuĉon strikte antaŭ la vizaĝon, Sam ŝteliris direkte al la klifo.

— Atentu! — flustris Frodo, sekvante. — Ne alarmu lin! Li estas multe pli danĝera ol li aspektas.

La nigra rampa figuro estis jam trikvarone malsupriĝinta, kaj restis eble pli aŭ malpli kvindek futojn super la klifosubo. Kaŭrante ŝtone senmove en la ombro de la rokego, la hobitoj gvatis lin. Li ŝajne alvenis malfacilan lokon aŭ estis ial ĝenita. Ili aŭdis lin snufi, kaj de tempo al tempo aŭdiĝis akra spirsiblo, kiu sonis sakre. Li levis sian kapon, kaj ili pensis aŭdi lin kraĉi. Poste li denove ekiris. Nun ili aŭdis lian grincantan kaj fajfantan voĉon.

— Aĥ, sss! Ssingarde, trezoro mia! Pli hasste, malpli rapide. Ni ne rissku kolbaton, ĉu, trezoro? Ne, trezoro — *golum'*! — Li denove levis sian kapon, palpebrumis al la luno kaj rapide fermis la okulojn. — Ni malamass ĝin, — li siblis. — Aĉa, aĉa tremema lumo ĝi estass, sss, ĝi dolorigass al ni la okulojn.

Li jam estis pli malsupre kaj la sibloj iĝis pli fortaj kaj klaraj.

— Kie ĝi esstass, kie ĝi esstass: mia Trezoro, mia Trezoro? Ĝi esstass

nia, ĝi esstass, kaj ni volass ĝin. La ŝŝtelintoj, la ŝŝtelintoj, la fiaj ŝŝtelisstetoj. Kie ili troviĝass kun mia Trezoro? Malbeno trafu ilin! Ni malamegas ilin.

— Ne sonas, ke li scias, ke ni ĉeestas, ĉu? — flustris Sam. — Kaj kio estas lia Trezoro? ĉu li aludas la ...

— Ĉit! — spiris Frodo. — Nun li alproksimiĝas, sufiĉe proksimas por aŭdi flustron.

Efektive Golumo jam denove paŭzis, kaj lia kapego sur la magra kolo pendolis de flanko al flanko kvazaŭ li aŭskultus. Liaj palaj okuloj estis duone malfermitaj. Sam regis sin, kvankam liaj fingroj tikis. Liaj okuloj, plenaj de kolero kaj naŭzo, fiksiĝis al la kreitaĉo dum tiu denove ekmoviĝis, ankoraŭ flustrante kaj siblante al si.

Finfine li estis je ne pli ol dekduon da futoj super la tero, rekte super iliaj kapoj. De tiu punkto estis seninterrompa falo, ĉar la klifo estis iom subtranĉita, kaj eĉ Golumo ne povis trovi ajnan tenejon. Li ŝajne klopodis torde turni sin, por ke la kruroj iru antaŭe, kiam subite kun alta fajfa kriĉo li falis. Tion farante li kurbigis ĉirkaŭ sin la krurojn kaj brakojn, kiel araneo kies grimpfadeno disiĝis.

Sam eliris el sia kaŝejo fulmrapide kaj transiris la spacon inter li kaj la klifosubo per du saltoj. Antaŭ ol Golumo povis stariĝi, Sam estis sur li. Sed li trovis Golumon pli malfacila ol li antaŭvidis, eĉ tiel trafitan, subite, nesingardan post falo. Antaŭ ol Sam povis alkroĉiĝi, longaj brakoj kaj kruroj ĉirkaŭis lin senmovigante liajn brakojn, kaj obstina tenego, mola sed terure forta, kunpremis lin kvazaŭ malrapide striktiĝantaj ŝnuretoj; humidaĉaj fingroj palpserĉis lian kolon. Poste akraj dentoj enmordis lian ŝultron. Li povis nenion alian ol bati sian duran rondan kapon kontraŭ la vizaĝon de la kreitaĵo. Golumo siblis kaj kraĉis, sed li ne malkroĉiĝis.

La afero irus pli malbone por Sam, se li estus sola. Sed Frodo saltstariĝis kaj elingigis Pikilon. Per la maldekstra mano li retrotiris la kapon de Golumo per ties maldensa malrigida hararo, streĉante lian longan kolon kaj devigante liajn palajn venenecajn okulojn gapi al la ĉielo.

— Lasu, Golumo, — li diris. — Jen Pikilo. Vi vidis ĝin iam antaŭe. Lasu, aŭ ĉi-foje vi spertos ĝin! Mi tranĉos al vi la gorĝon.

Golumo kolapsis kaj loziĝis kiel malseka ŝnureto. Sam stariĝis, fingrumante sian ŝultron. Liaj okuloj subbrulis kolere, sed li ne povis venĝi sin: lia mizera malamiko kuŝis lakeante plorete sur la ŝtonoj.

— Ne dolorigu nin! Ne lasu, ke ili dolorigu min, trezoro! Ili ne turmentoss nin, ĉu, afablaj etaj hobitsoj? Ni ne intencis ion malbonan, sed ili sursaltis nin kiel katoj sur povrajn musojn, tion ili faris, trezoro. Kaj ni estas tiel solecaj, *golum'*. Ni traktos ilin afable, tre afable, se ili afablos al ni, ĉu

ne, jes, jess.

— Nu, kion fari pri ĝi? — diris Sam. — Ligi ĝin, tiel ke ĝi ne plu povu ŝtele sekvi nin, laŭ mia opinio.

— Sed tio mortigus nin, mortigus nin, — ploretis Golumo. — Kruelaj etaj hobitsoj. Ŝnurumi nin en la fridaj malmolaj terenoj kaj forlasi nin, *golum', golum'*. — Plorsingultoj baŭmis en lia gluglanta gorĝo.

— Ne, — diris Frodo. — Se mortigi lin, ni devus mortigi lin tuje. Sed tion ni ne povas fari, ne dum la aferoj estas tiaj. Kompatindulaĉo. Li faris al ni neniom da malutilo.

— Ho, ĉu ne! — diris Sam, frotante sian ŝultron. — Ĉiuokaze li intencis fari, *kaj* li intencas fari, mi garantias. Sufoki nin dumdorme, jen lia plano.

— Sendube, — diris Frodo. — Sed tio, kion li intencas fari, estas alia afero. — Li paŭzis kelkan tempon meditante. Golumo kuŝis senmove, sed ĉesis plorkrii. Sam staris rigardante lin minace.

Tiam ŝajnis al Frodo, ke li aŭdas, tute klare sed malproksime, voĉojn el la pasinteco:

> Kiel domaĝe, ke Bilbo ne trapikis tiun fian kreaĵon, kiam li havis okazon!
>
> Domaĝe? Kompato retenis lian manon. Domaĝo, kaj kompato: ne trapiki senbezone.
>
> Mi sentas al Golumo neniom da kompato. Li meritas morton.
>
> Jes, meritas. Supozeble vi pravas. Multaj vivantoj meritas morton. Kaj iuj mortantoj meritas la vivon. Ĉu tion vi povas aranĝi? Do ne tro entuziasme prijuĝu mortkondamnon. Ĉar eĉ la tre saĝaj ne antaŭvidas ĉiujn celojn.

— En ordo, — li respondis voĉe, mallevante la glavon. — Tamen mi timas. Kaj malgraŭ tio, kiel vi vidas, mi ne tuŝos la kreaĵon. Ĉar vidante lin, mi efektive kompatas lin.

Sam mire rigardis sian mastron, kiu ŝajnis paroli al neĉeestanto. Golumo levis sian kapon.

— Jess, mizeraj ni estas, trezoro, — li plorplendis. — Mizero, mizero! Hobitoj ne mortigos nin, afablaj hobitoj.

— Ne, ni tion ne faros, — diris Frodo. — Sed ni ankaŭ ne permesos, ke vi foriru. Vi plenas je miso kaj malbonfaro, Golumo. Vi devos akompani nin, finfine, dum ni observas vin. Sed vi devos helpi nin, se vi povos. Mano manon lavas.

— Jess, jes ja, — diris Golumo sidiĝante. — Afablaj hobitoj! Ni iros kun ili. Trovos por ili sendanĝerajn padojn en la mallumo, jes ni faros. Kaj kien ili iras en jenaj malvarmaj duraj terenoj, ni scivolas, jes ni scivolas? — Li suprenrigardis al ili, kaj malforta lumo de ruzo kaj avido flagris momente en liaj palaj palpebrumantaj okuloj.

Sam malridis al li kaj suĉis siajn dentojn; sed li ŝajne perceptis ion

strangan pri la humoro de sia mastro, kaj ke la afero jam ne argumenteblas. Tamen mirigis lin la respondo de Frodo.

Frodo rigardis rekte en la okulojn de Golumo, kiuj retiriĝis kaj tordiĝe forturnis sin.

— Tion vi scias, aŭ vi sufiĉe trafe divenas, Smeagolo, — li diris kviete kaj severe. — Ni iras al Mordoro, kompreneble. Kaj vi konas la vojon tien, mi opinias.

— Aĥ! sss! — diris Golumo, kovrante la orelojn per la manoj, kvazaŭ tia honesteco kaj la malkaŝa prononcado de la nomoj doloris al li. — Ni divenis, jes, ni divenis, — li flustris; — kaj ni ne deziris, ke ili iru tien ĉu? Ne, trezoro, ne la afablaj hobitoj. Cindroj, cindroj, kaj polvo, kaj soifo estas tie; kaj ŝaktoj, ŝaktoj, ŝaktoj, kaj orkoj, miloj da orkoj. Afablaj hobitoj devas ne iri — sss — al tiuj lokoj.

— Do vi estis tie? — Frodo insistis. — Kaj vi estas retrenata tien, ĉu ne?

— Jess. Jess. Ne! — kriĉis Golumo. — Unufoje, tio estis senintenca, ĉu ne, trezoro? Jess, senintenca. Sed ni ne reiros, ne, ne! — Tiam subite ŝanĝiĝis liaj voĉo kaj lingvaĵo, kaj li plorsingultis gorĝe, kaj parolis sende al ili. — Lasu min trankvila, *golum'*! Vi dolorigas min. Ho, miaj povraj manoj, *golum'*! Mi, ni, mi ne volas reveni. Mi ne povas trovi ĝin. Mi estas laca. Mi, ni ne povas trovi ĝin, *golum', golum'*, ne, nenie. Ili ĉiam maldormas. Gnomoj, homoj, kaj elfoj, teruraj elfoj kun brilaj okuloj. Mi ne povas trovi ĝin. Ah! — Li stariĝis kaj pugnigis sian longan manon je osteca senkarna nodo, skuante ĝin al la oriento. — Ni ne faros! — li kriis. — Ne por vi. — Poste li ree kolapsis. — *Golum', golum'*, — li plorkriis vizaĝaltere. — Ne rigardu nin! Foriru! Endormiĝu!

— Li nek foriros, nek endormiĝos pro via ordono, Smeagolo, — diris Frodo. — Sed se vi vere volas liberiĝi de li denove, vi devas do helpi min. Kaj tio, mi timas, implicas ke vi trovu por ni padon al li. Sed ne necesos, ke vi iru la tutan vojon, ne post la pordegon de lia lando.

Golumo ree eksidis kaj rigardis lin el sub la palpebroj.

— Li troviĝas tiudirekte, — li gakis. — Ĉiam tiudirekte. Orkoj kondukos vin la tutan vojon. Facile troveblas orkoj oriente de l' rivero. Ne postulu de Smeagolo. Povra, povra Smeagolo, li foriris antaŭlonge. Oni forprenis lian Trezoron, kaj li perdiĝis.

— Eble ni retrovos lin, se vi akompanos nin, — diris Frodo.

— Ne, ne, neniam! Li perdis sian Trezoron, — diris Golumo.

— Stariĝu! — diris Frodo.

Golumo stariĝis kaj retropaŝis kontraŭ la klifon.

— Nun! — diris Frodo. — Ĉu vi pli facile trovas padon tage aŭ nokte? Ni estas lacaj, sed se vi elektos la nokton, ni ekiros hodiaŭ nokte.

— La lumegoj dolorigas al ni la okulojn, ili ja, — Golumo plendaĉis. — Ne sub la Blanka Vizaĝo, ankoraŭ ne. Ĝi iros malantaŭ la montaron baldaŭ, jess. Unue ripozu iom, afablaj hobitoj!

— Do sidiĝu, — diris Frodo, — kaj ne moviĝu!

La hobitoj sidigis sin apud li, po unu ambaŭflanke, apogante la dorson al la ŝtonmuro, ripozigante siajn krurojn. Ne necesis vorta interkonsento: ili sciis, ke ili devas ne ekdormi eĉ momente. Malrapide preterpasis la luno. Ombroj descendis de la montetoj, kaj ĉio mallumiĝis antaŭ ili. La steloj densiĝis kaj helis en la ĉielo. Neniu ekmoviĝis. Golumo sidis kun la kruroj kurbigitaj, genuoj submentone, plataj manoj kaj piedoj dismetitaj sur la tero, la okuloj fermitaj; sed li ŝajnis streĉita, kvazaŭ pensante aŭ aŭskultante.

Frodo rigardis al Sam. Iliaj okuloj renkontiĝis kaj ili komprenis. Ili malstreĉiĝis, klinante malantaŭen siajn kapojn, kaj fermante siajn okulojn aŭ ŝajnigis tion. Baldaŭ la sono de ilia mallaŭta spirado aŭdiĝis. La manoj de Golumo tikis iomete. Apenaŭ rimarkeble lia kapo moviĝis maldekstren kaj dekstren, kaj jen unu okulo, poste la alia, malfermiĝis mallarĝe. La hobitoj neniun indikon faris.

Subite, kun konsternaj viglo kaj rapideco, rekte de la tero per salto, kvazaŭ lokusta aŭ rana, Golumo saltegis antaŭen en la mallumon. Sed ĝuste tion atendis Frodo kaj Sam. Sam trafis lin antaŭ ol tiu faris du paŝojn post la salto. Frodo veninte malantaŭe kaptis lian kruron kaj ĵetis lin teren.

— Via ŝnuro eble pruviĝos denove utila, Sam, — li diris. Sam prenis la ŝnuron.

— Kaj kien vi celis en la duraj malvarmaj terenoj, sinjoro Golumo? — li graŭlis. — Ni scivolas, jes, ni scivolas. Por trovi iujn orkojnamikojn, mi garantias. Vi, aĉa perfidema kreaĵo. Devus ĉi ŝnuro ĉirkaŭi vian kolon, en strikta nodo cetere.

Golumo kuŝis kviete kaj entreprenis neniujn pluajn trukojn. Li ne respondis al Sam, sed direktis al li rigardon rapidan kaj venenan.

— Ni bezonas nur ion por reteni lin, — diris Frodo. — Ni volas, ke li marŝu, do ne utilas ligi liajn krurojn, nek la brakojn, li ŝajnas utiligi ilin preskaŭ same ofte. Ligu unu finon al lia maleolo, kaj tenu firme la alian finon.

Li staris apud Golumo, dum Sam ligis la nodon. La sekvo surprizis ilin ambaŭ. Golumo komencis kriĉi per maldensa ŝira sono, tre hororige aŭskultata. Li tordiĝis kaj provis proksimigi sian buŝon al sia maleolo kaj mordi la ŝnuron. Li daŭre kriĉadis.

Finfine Frodo konvinkiĝis, ke li vere sentas doloron; sed tio ne povis esti pro la nodo. Li esploris ĝin kaj konstatis, ke ĝi ne tro striktas, fakte striktas apenaŭ sufiĉe. Sam estis pli milda ol liaj vortoj.

— Kio estas al vi? — li diris. — Se vi insistas forkuri, vi devas esti ligita; sed ni ne volas dolorigi al vi.

— Ĝi dolorigas, ĝi dolorigas, — siblis Golumo. — Ĝi glaciigas, ĝi mordas! Elfoj tordis ĝin, ili estu malbenataj! Aĉaj kruelaj hobitoj! Jen kial ni provis eskapi, kompreneble tial, trezoro. Ni divenis, ke ili estas hobitoj kruelaj. Ili vizitas elfojn, atakemajn elfojn kun helaj okuloj. Forprenu ĝin. Ĝi dolorigas nin.

— Ne, mi ne forprenos ĝin, — diris Frodo, — krom se, — li momente paŭzis pensante, — krom se eblas promeso dirota de vi, kiun mi povas fidi.

— Ni ĵuros fari tion, kion li volas, jes, jess, — diris Golumo, ankoraŭ tordiĝante kaj palpserĉante sian maleolon. — Ĝi dolorigas nin.

— Ĉu ĵuros? — diris Frodo.

— Smeagolo, — diris Golumo subite kaj klare, larĝe malfermante siajn okulojn kaj rigardante Frodon kun stranga lumo. — Smeagolo ĵuros sur la Trezoro.

Frodo rektiĝis, kaj Sam denove estis surprizita de liaj vortoj kaj lia severa voĉo.

— Sur la Trezoro, ĉu? Kiel vi aŭdacas? Pensu!

Unu Ringo en mallumon ilin gvidas kaj katenas.

Ĉu vi dediĉus vian promeson al tio, Smeagolo? Ĝi devigos vin. Sed ĝi estas eĉ pli perfidema ol vi. Ĝi eble tordos viajn vortojn. Gardu vin! Golumo kaŭris.

— Sur la Trezoro, sur la Trezoro! — li ripetis.

— Kaj kion vi ĵuros? — demandis Frodo.

— Esti tre, tre bonkonduta, — diris Golumo. Poste rampinte ĝis la piedoj de Frodo li riverencegis antaŭ li, flustrante raŭke; tremego trapasis lin, kvazaŭ la vortoj skuus eĉ liajn ostojn pro timo. — Smeagolo ĵuros neniam, neniam permesi, ke Li havu ĝin. Neniam! Smeagolo savos ĝin. Sed li devas ĵuri sur la Trezoro.

— Ne! Ne sur ĝi, — diris Frodo, rigardante al li kun severa kompato. — Vi volas nur vidi ĝin kaj tuŝi ĝin, se vi povos, kvankam vi scias, ke tio frenezigus vin. Ne sur ĝi. Ĵuru laŭ ĝi, se vi volas. Ĉar vi scias, kie ĝi estas. Jes, vi scias, Smeagolo. Ĝi estas antaŭ vi.

Momente ŝajnis al Sam, ke lia mastro estas kreskinta kaj Golumo ŝrumpis: alta severa princo, kiu kaŝis sian helecon en griza nubo, kaj ĉe liaj piedoj eta plorkria hundo. Tamen tiuj du estis iel parencaj kaj ne fremdaj. Ili povis atingi la menson unu de la alia. Golumo levis sin kaj komencis palpkaresi Frodon, ĝentilumante antaŭ liaj genuoj.

— Suben! suben! — diris Frodo. — Jam diru la promeson!

— Ni promesas, jes mi promesas! — diris Golumo. — Mi servos la mastron de la Trezoro. Bona mastro, bona Smeagolo, *golum', golum'*! — Subite li ekploris kaj denove mordis sian maleolon.

— Forprenu la ŝnuron, Sam! — diris Frodo.

Malvolonte Sam obeis. Tuj Golumo stariĝis kaj komencis kaprioli kiel batita hundaĉo kies mastro karesis ĝin. De tiu momento okazis en li ŝanĝiĝo, kiu daŭris kelkan tempon. Li parolis malpli sible kaj plorvoĉe, kaj li alparolis rekte siajn kunulojn, ne sian trezoran memon. Li kaŭris kaj retiriĝis se ili proksimiĝis al li, aŭ subite ekmoviĝis, kaj li evitis tuŝi iliajn elfajn mantelojn; sed li estis amikeca, kaj efektive kompatinde avida plaĉi al ili. Li ridgakis kaj kapriolis, se oni spritis, aŭ eĉ se Frodo alparolis lin afable, kaj ploris se Frodo admonis lin. Sam diris al li malmulton entute. Li pli profunde ol antaŭe suspektis lin, kaj se tio eblas, ŝatis malpli la novan Golumon, la Smeagolon, ol la malnovan.

— Nu, Golumo, aŭ kiel ajn ni devas nomi vin, — li diris, — ek al! Foriris la luno, kaj la nokto forpasas. Prefere ni ekiru.

— Jes, jes, — konsentis Golumo, ĉirkaŭdancante. — Ni ekiru! Troviĝas nur unu transira vojo inter la norda kaj suda ekstremoj. Mi trovis ĝin, mi ja. Orkoj ne uzas ĝin, orkoj ne konas ĝin. Orkoj ne transiras la marĉojn, ili ĉirkaŭiras multmejle. Tre bonŝance vi venis ĉi-direkten. Tre bonŝance vi trovis Smeagolon, jes. Sekvu Smeagolon!

Li foriris kelkajn paŝojn kaj retrorigardis scivoleme, kiel hundo invitanta ilin al promeno.

— Atendu iom, Golumo! — kriis Sam. — Jam ne tro malproksimiĝu antaŭe! Mi estos ĉe via vosto, kaj mi tenas preta la ŝnuron.

— Ne, ne! — diris Golumo. — Smeagolo promesis.

En profunda nokto sub malmolaj klaraj steloj ili ekvojaĝis. Golumo kondukis ilin ree norden dum iom da tempo laŭ la vojo jam trapasita; poste li oblikvis dekstren for de la kruta rando de Emin Muilo, suben laŭ la malglataj ŝtonozaj deklivoj al la vastaj subaj marĉejoj. Ili fadis rapide kaj mallaŭte en la mallumon. Tra ĉiuj leŭgoj da dezertejo antaŭ la pordego de Mordoro estis nigra silento.

2

La trapaso de l’ Marĉejo

Golumo moviĝis rapide, kun la kapo kaj kolo antaŭenŝovitaj, ofte uzante tiel la manojn kiel la piedojn. Frodo kaj Sam nur malfacile egalpaŝis kun li; sed ŝajnis, ke li ne plu pensis pri eskapo, kaj kiam ili iom postrestis, li turniĝis kaj atendis ilin. Post iom da tempo li kondukis ilin ĝis la rando de la mallarĝa ravineto, kien ili trafis pli frue; sed ili jam pli malproksimis de la montetaro.

— Jen ĝi! — li kriis. — Troviĝas vojo al la interno, jes. Nun ni sekvos ĝin, elen, jene foren tiudirekte. — Li fingromontris suden kaj orienten al la marĉejo. Ties odoro alvenis iliajn naztruojn, peza kaj fetora eĉ en la friska nokta aero.

Golumo serĉis tien-reen sur la rando, kaj fine li alvokis ilin.

— Ĉi tie! Ni povos malsupreniri ĉi tie. Smeagolo unu fojon iris ĉi-voje, mi iris ĉi-voje min kaŝante de orkoj.

Li iris la unua, kaj sekvante lin la hobitoj subengrimpis en la mornon. Ne estis malfacile, ĉar la fendo tie estis profunda nur proksimume dek kvin futojn kaj ĉirkaŭ dek du de flanko al flanko. Ĉe la fundo estis fluanta akvo: tio estis fakte la kurejo de unu el la multaj riveretoj, kiuj fluetis suben el la montetoj por nutri la stagnajn lagetojn kaj marĉojn pretere. Golumo turnis sin dekstren, pli-malpli suden, kaj plaŭdis antaŭen kun la piedoj en la malprofunda ŝtonoza fluo. Li ŝajnis ege ĝojigita spertante la akvon, kaj klukridis al si, foje eĉ grakante specon de kanto.

La land’ fridportas,
la manojn mordas,
piedojn maĉas.
La rokaj boskoj
simile al ostoj
senkarnaĉas.
Sed flak’ rivere
malsekas tenere,
piedojn plaĉas!
Kaj nun ni volas...

— Ha! Ha! Kion ni volas? — li diris, flankenstrabante al la hobitoj. — Ni diros al vi, — li grakis. — Li tion divenis antaŭlonge, Baginzo

divenis tion. — Ekbrilo aperis en liaj okuloj, kaj Sam, rimarkante tiun ekbrilon en la mallumo, taksis ĝin ege malagrabla.

Sen spir' sed alarma;
morte malvarma;
neniam soifas, ĉiam trinkas;
maŝvestite neniam tintas.
Sur tero dronas,
insulon rekonas
esti ja monto;
pensas ke fonto
estas aera.
Glata kaj bela!
Renkonti, plezure!
Kapti bongustan
fiŝon langustan
volas ni nure!

Tiuj vortoj nur igis pli urĝa en la pensoj de Sam problemon, kiu ĝenis lin ekde la momento, kiam li komprenis, ke lia mastro intencas utiligi Golumon kiel gvidanton: problemo pri nutraĵo. Ne venis al li en la kapon, ke eble ankaŭ lia mastro pripensis tion, sed li supozis, ke Golumo tion faris. Efektive, kiel Golumo nutris sin dum sia tuta soleca vojaĝado? "Ne tre bone, — pensis Sam. — Li aspektas sufiĉe malsatega. Li ne tro delikatas por provi la guston de hobito se mankas fiŝoj, mi vetas — supoze se li trafus nin senatentaj. Nu, tion li ne faros: ne Samon Vato inter aliaj".

Dum longa tempo ili stumblis antaŭen en la malhela serpentuma ravineto, aŭ tiel ŝajnis al la lacaj piedoj de Frodo kaj Sam. La ravineto turniĝis orienten, kaj dum la pluiro ĝi plilarĝiĝis kaj iom post iom malprofundiĝis. Finfine la ĉielo paliĝis de la unua matena grizo. Golumo ĝis tiam vidigis neniun laciĝon, sed nun li suprenrigardis kaj haltis.

— La tago proksimas, — li flustris, kvazaŭ Tago estus io, kio eble subaŭskultus lin kaj alsaltus lin. — Smeagolo restos ĉi tie: mi restos ĉi tie, kaj la Flava Vizaĝo ne vidos min.

— Mi ĝojus vidi la sunon, — diris Frodo, — sed ni restos ĉi tie: ni estas tro lacaj por iri pluen nuntempe.

— Vi ne saĝas ĝojante pri la Flava Vizaĝo, — diris Golumo. — Ĝi vidigas vin. Afablaj sagacaj hobitoj restu kun Smeagolo. Orkoj kaj fiaĵoj estas en la najbaraĵo. Ili povas vidi longdistancen. Restu kaj kaŝu vin kun mi!

La triopo sidiĝis por ripozi sube de la rokflanko de la ravineto. Tiu ne

multe pli altis nun ol altkreska homo, kaj ĉe la subo estis larĝaj plataj bretoj el seka ŝtonaĵo; la akvo fluis en kanaleto aliflanke. Frodo kaj Sam sidis sur unu el la platoj, ripozigante siajn dorsojn. Golumo padelis kaj skrablis en la fluo.

— Ni devas manĝi iomete da nutraĵo, — diris Frodo. — Ĉu vi malsatas, Smeagolo? Ni havas tre malmulton dividotan, sed ni disponigos al vi tiom, kiom ni povos.

Pro la vorto *malsatas* verdeca lumo ekardis en la palaj okuloj de Golumo, kaj ili ŝajnis eĉ pli elstari ol antaŭe sur lia magra malsaneca vizaĝo. Momente li reprenis sian antaŭan Goluman manieron.

— Ni malssategass, jes malssategass, trezoro, — li diris. — Kion ili manĝas? Ĉu ili havas agrablajn fiŝŝojn? — Lia langoelpendis inter la akraj flavaj dentoj kaj lekis la senkolorajn lipojn.

— Ne, fiŝojn ni ne havas, — diris Frodo. — Ni havas nur ĉi tion, — li vidigis oblaton da *lembaso*, — kaj akvon, se la akvo ĉi tie estas trinkinda.

— Jess, jess, akvo bela, — diris Golumo. — Trinku ĝin, trinku ĝin, dum ni ankoraŭ povas! Sed kion ili havas, trezoro? Ĉu ĝi maĉeblas? Ĉu ĝi bongustas?

Frodo derompis pecon da oblato kaj donis ĝin al li sur ĝia folivolvaĵo. Golumo snufis la folion kaj lia vizaĝo ŝanĝiĝis: spasmo da naŭzo aperis sur ĝi kaj sugesto pri lia malnova malico.

— Smeagolo flaras ĝin! — li diris. — Folioj el la elfa lando, pu! Ili fetoras. Li grimpis tiujn arbojn, kaj li ne povis forlavi la odoron de siaj manoj, miaj belaj manoj. — Faligante la folion, li prenis anguleton de la *lembaso* kaj mordetis ĝin. Li kraĉis, kaj tusado skuis lin.

— Ah! Ne! — li balbutis. — Vi provas sufoki la kompatindan Smeagolon. Polvon kaj cindron li ne povas manĝi. Li devas malsati. Sed al Smeagolo ne gravas. Afablaj hobitoj! Smeagolo ja promesis. Li malsatos. Nutraĵon de hobitoj li ne povas manĝi. Li malsatos. Kompatinda maldika Smeagolo!

— Mi bedaŭras, — diris Frodo, — sed mi ne povas helpi vin, mi timas. Mi opinias, ke tiu ĉi nutraĵo bonefikus al vi, se vi provus. Sed eble vi eĉ ne povas provi, almenaŭ ne ankoraŭ.

La hobitoj silente maĉis sian *lembason*. Sam opiniis, ke ĝi multe pli bongustas iel, ol ĝi bongustis jam de kelka tempo: la konduto de Golumo igis lin denove atenti ĝian guston. Sed li ne sentis sin komforta. Golumo rigardis ĉiun pecon de mano al buŝo, kiel hundo atenda apud seĝo de tagmanĝanto. Nur kiam ili finmanĝis kaj pretiĝis ripozi, tiam li verŝajne konvinkiĝis, ke ili havas neniujn kaŝitajn frandaĵojn, kiujn li povus dividi. Tiam li iris sidi sola for kelkajn paŝojn kaj iomete plorĝemis.

— Vidu! — Sam flustris al Frodo, ne tro mallaŭte; li vere ne zorgis, ĉu aŭ ne Golumo aŭdas lin. — Ni devas iom dormi; sed ne ambaŭ samtempe dum proksimas tiu kanajlo, kun aŭ sen promeso. Ĉu Smeagolo aŭ Golumo, li ne ŝanĝos siajn kutimojn rapide, mi garantias. Ekdormu vi, sinjoro Frodo, kaj mi vekos vin, kiam mi ne plu povos teni apertaj la palpebrojn. Laŭvice, kiel antaŭe, dum li estas neligita.

— Eble vi pravas, Sam, — diris Frodo malkaŝe. — Ja estas en li ŝanĝiĝo, sed kia ŝanĝiĝo kaj kiel profunda, tion mi ankoraŭ ne certas. Serioze tamen, mi ne opinias necese timi nuntempe. Tamen vaĉu, se vi volas. Havigu al mi ĉirkaŭ du horojn, ne pli, kaj poste veku min.

Tiel laca estis Frodo, ke lia kapo kliniĝis antaŭen sur la bruston kaj li ekdormis, preskaŭ tuj post kiam li elparolis tiujn vortojn. Golumo ŝajnis ne plu sperti timon. Li kurbiĝis kaj baldaŭ endormiĝis, tute senĝene. Baldaŭ la spiro siblis mallaŭte tra la kunpremitaj dentoj, sed li kuŝis ŝtone senmova. Post kelka tempo, timante ke li ekdormos, se li sidos aŭskultante la spiradon de siaj du kunuloj, Sam stariĝis kaj malabrupte fingropuŝis Golumon. Ties manoj malpugniĝis kaj tikis, sed neniun alian moviĝon li faris. Sam kliniĝis kaj diris *fiŝŝo* apud lia orelo, sed venis neniu respondo, eĉ ne interrompeto en la spirado de Golumo.

Sam gratis la kapon.

— Vere devas esti, ke li dormas, — li murmuris. — Kaj se mi similus Golumon, li neniam plu revekiĝus. — Li bridis la penson pri sia glavo kaj la ŝnuro, kiuj ekestis en lia menso, kaj iris sidiĝi apud sia mastro.

Kiam li vekiĝis, la ĉielo estis malheleta, ne pli hela sed malpli hela ol kiam ili matenmanĝis. Sam salte stariĝis. Ne malpleje pro la propra sento de viglo kaj malsato, li subite komprenis, ke li fordormis la taglumon, naŭ horojn minimume. Frodo ankoraŭ dormadis nun kuŝante etendite sur la flanko. Golumo ne estis videbla. Diversaj admonaj nomoj por si venis al la menso de Sam, ĉerpitaj el la vortprovizo de la Avulo; poste plu venis al li en la kapon, ke lia mastro pravis: provizore estis nenio kontraŭgardenda. Ili estis ĉiuokaze ambaŭ vivaj kaj nesufokitaj.

— Kompatindulaĉo! — li diris duone sinriproĉe. — Jam mi scivolas, kien li iris?

— Ne malproksimen, ne malproksimen! — diris voĉo desupre. Li rigardis supren kaj vidis la figuron kun la grandaj kapo kaj oreloj fone de la vespera ĉielo.

— Hej, kion vi faras? — kriis Sam, la suspektoj revenis tuj kiam li ekvidis tiun figuron.

— Smeagolo malsatas, — diris Golumo. — Revenos baldaŭ.

— Revenu nun! — kriis Sam. — Hej! Revenu! — Sed Golumo jam

malaperis.

Frodo vekiĝis pro la krio de Sam kaj sidiĝis, frotante siajn okulojn.

— Saluton! — li diris. — Ĉu io misas? Kioma horo estas?

— Mi ne scias, — diris Sam. — Post la sunsubiro, ŝajnas al mi. Kaj li foriris. Diris, ke li malsatas.

— Ne zorgu! — diris Frodo. — Nenio farebla. Sed li revenos, vi vidos. La promeso efikos dum ankoraŭ iom da tempo. Kaj li ĉiuokaze ne forlasos sian Trezoron.

Frodo bagateligis tion, kiam li eksciis, ke ili profunde dormis dum horoj kun Golumo, kaj cetere Golumo tre malsata kaj neligita apude.

— Ne pensu pri iuj el la fortaj vortoj de via Avulo, — li diris. — Vi estis elĉerpita, kaj ĉio rezultis bone: ni ambaŭ estas jam ripozintaj. Kaj antaŭ ni estas malfacila vojo, la plej malfacila vojo el ĉiuj.

— Pri la nutraĵo, — diris Sam. — Kiom longe okupos nin tiu ĉi tasko? Kaj kiam ĝi estos finita, kion ni tiam faros? Tiu ĉi vojpano mirinde tenas onin surpieda, kvankam ĝi ne inde kontentigas la internaĵon, kiel oni povus diri: ne laŭ mia sento ĉiuokaze, sen malrespekto al tiuj, kiuj faris ĝin. Sed oni devas ion manĝi ĉiutage, kaj ĝi ne kreskas. Mi kalkulas, ke ni havas sufiĉon por, ni diru, proksimume tri semajnoj, kaj tiom kun strikta zono kaj delikataj dentoj, sciu. Ni iom libere traktis ĝin ĝis nun.

— Mi ne scias, kiom longe ni bezonos por... Por fini, — diris Frodo. — Ni estis aĉe malhelpataj en la montetaro. Sed Samsaĝo Vato, mia kara hobito, efektive, mia plej kara hobito Sam, amiko el amikoj, al mi ŝajnas, ke ne necesas al ni pripensi, kio fariĝos poste. *Fini la taskon*, laŭ via esprimo... Kia espero ekzistas, ke ni iam kapablos? Kaj se jes, kiu scias, kio rezultos el tio? Se la Unu eniros la Fajron, kaj ni ĉeestos? Mi demandas al vi, Sam, ĉu verŝajnas, ke ni iam denove bezonos panon? Mi opinias, ke ne. Se ni povos varti niajn krurojn ĝis atingi Monton de Sorto, jen ĉio kion ni povas fari. Pli ol mi kapablas, mi komencas senti.

Sam kapjesis silente. Li kaptis la manon de sia mastro kaj kliniĝis al ĝi. Li ne kisis ĝin, kvankam liaj larmoj falis sur ĝin. Poste li sin forturnis, viŝis per maniko sian nazon, stariĝis kaj ĉirkaŭstamfis, klopodante fajfi, kaj dirante inter klopodoj:

— Kie estas tiu kreitaĉo?

Post fakte ne tre longe revenis Golumo; sed li venis tiom kviete, ke ili ne aŭdis lin ĝis li staris antaŭ ili. Liajn fingrojn kaj vizaĝon makulis nigra koto. Li ankoraŭ maĉis kaj bavis. Kion li maĉas, ili preferis ne demandi kaj ne emis pripensi.

“Vermojn aŭ blatojn aŭ ion ŝiman el truoj, — pensis Sam. — Brr! La fikreito, la kompatindulaĉo!”

Golumo diris nenion al ili, ĝis li trinkis profunde kaj sin lavis en la rojo. Poste li proksimiĝis al ili, lekante siajn lipojn.

— Jam pli bone, — li diris. — Ĉu ni ripozis? Pretas ekiri? Afablaj hobitoj, ili dormas bele. Fidas nun Smeagolon? Tre, tre bone.

La sekva stadio de la vojaĝo sufiĉe similis la antaŭan. Dum ili pluiris, la ravineto ĉiam pli malprofundiĝis kaj la deklivo de ĝia fundo iĝis pli malabrupta. Ĝia subo estis malpli ŝtonoza kaj pli grundeca, kaj iom post iom ĝiaj flankoj iĝis nuraj randoj. Ĝi komencis serpentumi kaj vagadi. Tiu nokto proksimiĝis al sia fino, sed nuboj jam kovris lunon kaj stelojn, kaj ili konstatis la alvenon de la tago nur pro la malrapida dissterniĝo de maldensa griza lumo.

En frosta horo ili alvenis la ekstremon de la akvofluo. La bordoj iĝis muskokovritaj teramasetoj. Trans la lasta breto de putra ŝtono la rojo gargaris kaj subenfalis al bruna marĉo kaj perdiĝis. Sekaj kanoj siblis kaj klakis, kvankam neniu vento senteblis.

Ambaŭflanke kaj antaŭe nun kuŝis marĉoj kaj kotoj, etendiĝantaj suden kaj orienten en la malhelan duonlumon. Nebuletoj volviĝis kaj fumis el mallumaj kaj naŭzegaj flakoj. Ties fetoro ŝvebis sufoke en la senmova aero. Fore, jam preskaŭ rekte sude, la montaj muroj de Mordoro baŭmis, kvazaŭ nigra barilo el krudaj nuboj ŝvebantaj super danĝera nebulkovrita maro.

La hobitoj nun tute dependis de Golumo. Ili ne sciis, kaj en tiu nebula lumo ne povis diveni, ke ili estis fakte nur ĝuste interne de la nordaj bordoj de la marĉejo, kies ĉefa etendaĵo kuŝis sude de ili. Ili povus, se ili konus la terenon, kun iom da prokrasto iom reiri laŭ siaj paŝoj, kaj poste turniĝinte orienten ĉirkaŭiri per malmolaj vojoj al la dezerta ebenaĵo Dagorlado: la kampo de l' antikva batalo antaŭ la Pordego de Mordoro. Tamen tia vojo ne proponus multan esperon. Sur tiu ŝtonoza ebenaĵo mankis sinkaŝaj eblecoj, kaj tra ĝi kondukis la ĉefvojoj de la orkoj kaj aliaj soldatoj de la Malamiko. Eĉ la manteloj de Lorieno ne kaŝus ilin tie.

— Kiel ni direktas nian vojon nun, Smeagolo? — demandis Frodo. — Ĉu necesas trairi ĉi fetorajn marĉejojn?

— Ne necesas, tute ne necesas, — diris Golumo. — Ne, se la hobitoj volas atingi la malhelajn montojn kaj renkonti Lin tre rapide. Retro iom, kaj iom ĉirkaŭe, — lia maldika brako gestis norden kaj orienten, — kaj vi alvenos durajn malvarmajn vojojn ĝis la pordego de Lia lando. Multaj el Liaj personoj estos tie atentante pri gastoj, tre kontentaj konduki ilin senprokraste al Li, ho jes. Lia Okulo gvatas tiun vojon la tutan tempon. Ĝi kaptis Smeagolon tie, antaŭ longe. Sed Smeagolo post tio uzis siajn okulojn, jes, jes: mi uzis la okulojn, piedojn kaj nazon de tiam. Mi konas aliajn vojojn. Pli malfacilajn, ne tiom rapidajn, sed pli bonajn, se ni deziras, ke Li

ne vidu. Sekvu Smeagolon! Li povas konduki vin tra la marĉoj, tra la nebuletoj, agrablaj densaj nebuletoj. Sekvu Smeagolon tre zorge, kaj vi povos iri tre longe, sufiĉe longe, antaŭ ol Li kaptos vin, jes eble.

Jam tagiĝis, venis mateno senventa kaj malafabla, kaj la marĉaj fetoroj kuŝis en pezaj amasiĝoj. Neniom da suno penetris la malaltan nuboplenan ĉielon, kaj Golumo ŝajnis avida daŭrigi tuj la vojaĝon. Do post mallonga ripozeto ili ekiris denove kaj baldaŭ perdiĝis en ombreca silenta mondo, forbarita de observo al la ĉirkaŭaj terenoj, ĉu de la montetoj kiujn ili forlasis, ĉu de la montoj celataj. Ili iris laŭ malrapida spaliro: Golumo, Sam, Frodo.

Frodo ŝajnis el la tri la plej laca, kaj kvankam ili iris malrapide, li ofte postrestis. La hobitoj baldaŭ konstatis, ke tio kio aspektis kiel unu vasta marĉejo estas fakte senfina reto da lagetoj kaj molaj kotejoj, kaj serpentumaj duonbaritaj fluoj. Inter ili lertaj okuloj kaj piedoj povis trovi vagan vojon. Golumo certe posedis tian lerton kaj bezonis ĝin tute. Lia kapo sur la longa kolo senĉese turniĝis tien kaj reen, dum li snufis kaj murmuris al si la tutan tempon. Foje li levis alte sian manon kaj haltigis ilin, dum li antaŭeniris iom, kurbiĝinte, esplorante la teron per fingroj aŭ piedfingroj, aŭ nur aŭskultante per unu orelo premita al la tero.

Estis tede kaj lacige. Malvarma malseketa vintro ankoraŭ regis en tiu forlasita lando. La sola verdaĵo estis la ŝaŭma tavolo de palaj loloj sur la mallumaj grasaj supraĵoj de la malafablaj akvoj. Mortintaj herboj kaj putraj kanoj aperis en la nebuleto kiel ĉifaj ombroj de someroj longe forgesitaj.

Dum la tago pasadis, la lumo iomete plifortiĝis, kaj la nebuletoj foriĝis, iĝante pli maldensaj kaj pli travideblaj. Fore super la putraĵo kaj vaporoj de la mondo la suno jam ŝvebis alta kaj ora en serena lando kun fundoj el blindiga ŝaŭmo, sed nur okazan sunfantomon ili povis vidi tie sube, malklaran, palan, kiu havigis neniom da koloro kaj neniom da varmo. Sed eĉ pro tiu ĉi memorigo pri ĝia ĉeesto Golumo faltigis la frunton kaj kuntiriĝis. Li haltigis la vojaĝon, kaj ili ripozis, kaŭrante kvazaŭ persekutataj bestetoj, rande de granda brana kanaro. Profunde kvietis, nur supraĵe tuŝite per la malforta tremeto de malplenaj semoplumoj, kaj rompitaj herberoj tremantaj en etaj aermoviĝoj kiujn ili ne povis senti.

— Eĉ ne birdo! — diris Sam funebre.

— Ne, neniom da birdoj, — diris Golumo. — Agrablaj birdoj! — Li lekis siajn dentojn. — Neniom da birdoj ĉi tie. Estas serpentsoj, vermsoj, aĵoj en la lagetoj. Multaj aĵoj, multe da aĵoj malagrablaj. Neniom da birdoj, — li finis malĝoje. Sam rigardis lin malŝate.

Tiel pasis la tria tago de ilia vojaĝo kun Golumo. Antaŭ ol la vesperaj ombroj longiĝis en landoj pli feliĉaj, ili pluiris, ĉiam pluiris kun nur

mallongaj haltoj. Ili haltis ne tiom por ripozi, kiom por helpi Golumon, ĉar nun eĉ li devis antaŭeniri ekstreme singarde, kaj li kelkfoje dum tempeto ne sciis precize kien iri. Ili jam atingis la mezon mem de la Mortaj Marĉoj, kaj estis mallume.

Ili marŝis malrapide, kliniĝinte, proksimspalire, atente rigardante ĉiun moviĝon de Golumo. La marĉejo iĝis pli malseka, etendiĝante al larĝaj stagnaj lagoj, inter kiuj ĉiam pli kaj pli malfacilis trovi la lokojn pli firmajn, kie piedoj povis paŝi ne sinkante en gargaran koton. La vojaĝantoj estis malpezaj, alie eble neniu el ili iam sukcesus trovi travojon.

Baldaŭ iĝis tute senlume: la aero ŝajnis nigra kaj peza spiraĵo. Kiam aperis lumoj, Sam frotis siajn okulojn. Al li ŝajnis, ke lia kapo difektiĝas. Li unue ekvidis per angulo de sia maldekstra okulo strieton da pala ekbrilo, kiu forvelkis; sed aliaj aperis baldaŭ poste: iuj kiel malklara hela fumo, iuj kiel nebulecaj flamoj flagrantaj malrapide super nevideblaj kandeloj; tie kaj tie ili tordiĝis kiel fantomecaj toloj malvolvitaj de kaŝitaj manoj. Sed neniu el ambaŭ kunuloj diris vorton.

Finfine Sam ne plu povis toleri tion.

— Kio estas ĉio ĉi, Golumo? — li demandis flustre. — Tiuj lumoj? Ili ĉie ĉirkaŭas nin nun. Ĉu ni estas enfermitaj? Kiuj ili estas?

Golumo rigardis supren. Malhela akvo estis antaŭ li, kaj li rampis surtere, tien kaj reen, dubema pri la vojo.

— Jes, ili tute ĉirkaŭas nin, — li flustris. — La trukaj lumoj. Kandeloj de kadavroj, jes, jes. Ne atentu ilin! Ne rigardu! Ne sekvu ilin! Kie estas la mastro?

Sam retrorigardis kaj konstatis, ke Frodo denove postrestas. Li ne povis vidi lin. Li reiris kelkajn paŝojn en la mallumon, ne aŭdacante iri tre foren, aŭ voki pli laŭte ol per raŭka flustro. Subite li stumblis kontraŭ Frodo, kiu staris enpensiĝinte, rigardante la palajn lumojn. Liaj manoj pendis rigide apud la flankoj; akvo kaj ŝlimo degutis de ili.

— Venu, sinjoro Frodo! — diris Sam. — Ne rigardu ilin! Golumo avertis pri ili. Ni proksime sekvu lin kaj eliru el tiu ĉi malbeninda lando laŭeble rapide, se ni povos!

— Bone, — diris Frodo, kvazaŭ vekiĝante el revo. — Mi venas. Antaŭen!

Rapidante denove antaŭen, Sam stumblis, trafante per la piedo ian malnovan radikon aŭ teramaseton. Li falis kaj pezis sur la manojn, kiuj sinkis profunde en la gluecan koton, tiel ke lia vizaĝo proksimiĝis al la supraĵo de la malluma lago. Aŭdiĝis malforta siblo, leviĝis naŭza odoro, la lumoj flagris, dancis kaj kirliĝis. Momente la akvo sub li aspektis kiel ia fenestro, kovrita de malpura vitro, tra kiu li rigardas. Ŝirtrenante siajn

manojn el la marĉo, li retrosaltis kriante:

— Troviĝas mortintoj, mortaj vizaĝoj en la akvo, — li diris terurite. — Mortaj vizaĝoj!

Golumo ridis.

— La Mortaj Marĉoj, jes, jes: tiel ili nomiĝas, — li gakis. — Vi devas ne enrigardi, kiam la kandeloj brulas.

— Kiuj ili estas? Kio ili estas? — demandis Sam tremegante, turnante sin al Frodo, kiu nun estis malantaŭ li.

— Mi ne scias, — diris Frodo per dormema voĉo. — Sed ankaŭ mi vidis ilin. En la lagetoj, kiam la kandeloj brulas. Ili kuŝas en ĉiuj lagetoj, vizaĝoj palaj, profunde-profunde sub la malhela akvo. Mi vidis ilin: malafablajn kaj misajn vizaĝojn, kaj noblajn tristajn vizaĝojn. Multaj vizaĝoj fieraj kaj belaj, kaj loloj en iliaj arĝentaj hararoj. Sed ĉiuj hidaj, ĉiuj putraj, ĉiuj mortaj. Kruela lumo trafas ilin. — Frodo kaŝis siajn okulojn per la manoj. — Mi ne scias, kiuj ili estas; sed mi kredis vidi tie homojn, elfojn kaj orkojn apude.

— Jes, jes, — diris Golumo. — Ĉiuj mortaj, ĉiuj putraj. Elfoj, kaj homoj, kaj orkoj. La Mortaj Marĉoj. Okazis granda batalo antaŭlonge, jes, tiel oni diris al Smeagolo, kiam li estis juna, kiam mi estis juna, antaŭ ol venis la Trezoro. Ĉi tie estis granda batalo. Altaj homoj kun longaj glavoj, kaj teruraj elfoj, kaj orkoj kriĉantaj. Ili batalis sur la ebenaĵo dum tagoj kaj monatoj ĉe la Nigra Pordego. Sed la marĉoj plivastiĝis post tiam, englutis la tombojn; ĉiam rampante, rampante.

— Sed tio okazis antaŭ epoko kaj pli, — diris Sam. — La mortintoj ne povas esti efektive tie! Ĉu ĝi estas ia demonaĵo kovita en la Malhela Lando?

— Kiu scias? Smeagolo ne scias, — respondis Golumo. — Oni ne povas atingi ilin, oni ne povas tuŝi ilin. Ni provis unufoje, jes, trezoro. Mi provis unufoje; sed oni ne povas atingi ilin. Nur formoj videblaj, eble, ne tuŝeblaj. Ne, trezoro! Ĉiuj mortaj.

Sam rigardis lin malŝate kaj tremis denove, pensante, ke li divenas, kial Smeagolo provis tuŝi ilin.

— Nu, mi ne volas vidi ilin, — li diris. — Neniam denove! Ĉu ni ne povas pluiri kaj eskapi?

— Jes, jes, — diris Golumo. — Sed malrapide, tre malrapide. Tre singarde! Aŭ la hobitoj subeniros aliĝe al la mortintoj kaj fajrigos kandeletojn. Sekvu Smeagolon! Ne rigardu la lumojn!

Li forrampis dekstren, serĉante vojon ĉirkaŭ la lagon. Ili sekvis proksime, kliniĝinte, ofte uzante la manojn samkiel li. “Tri trezoraj Golumetoj en spaliro ni estos, se tio ĉi multe pli longe daŭros”, — pensis Sam.

Fine ili alvenis la ekstremon de l' nigra lago, kaj ili transiris ĝin, kaŭre, dangere, rampante aŭ saltante de unu nefidinda insula amaseto al alia. Ofte ili baraktis, paŝante aŭ falante manojn-antaŭe en akvojn naŭzajn kiel kloako, ĝis ili estis ŝlimkovritaj kaj makulitaj preskaŭ ĝiskole kaj fetoris en la naztruoj unu de la alia.

Estis malfrunokte, kiam ili finfine atingis teron pli firman denove. Golumo siblis kaj flustris al si, sed ŝajnis, ke li estas kontenta: laŭ ia mistera maniero, per ia kunfandita sento de palpado, flarado kaj nekutima memoro pri formoj en la mallumo li ŝajnis scii precize, kie li ree estis, kaj certi pri la vojo antaŭe.

— Nun antaŭen ni iras! — li diris. — Afablaj hobitoj! Bravaj hobitoj! Tre tre lacaj, kompreneble, tiaj ni estas, mia trezoro, ĉiuj el ni. Sed ni devas konduki la mastron for de l' misaj lumoj, jes, jes, ni devas.

Post tiuj vortoj li ekiris denove, preskaŭ trote, laŭ direkto, kiu aspektis longa aleo inter altaj kanoj, kaj ili stumble sekvis lin laŭeble rapide. Sed post iom da tempo li haltis subite kaj snufis dubeme la aeron, siblante kvazaŭ li estus ĝenata aŭ malkontenta denove.

— Kio estas? — graŭlis Sam, miskomprenante la signojn. — Kial necesas snufi? La fetoro preskaŭ faligas min eĉ nazotene. Vi fetoras, kaj la mastro fetoras; la tuta loko fetoras.

— Jes, jes, kaj Sam fetoras! — respondis Golumo. — Kompatinda Smeagolo flaras tion, sed bona Smeagolo ĝin toleras. Helpas la afablan mastron. Sed tio ne gravas. La aero moviĝas, ŝanĝiĝo proksimiĝas. Smeagolo scivolas; li ne estas feliĉa.

Li pluiris, sed lia maltrankvilo pliiĝis, kaj de tempo al tempo li stariĝis plenstreĉe, trudante sian kolon orienten kaj suden. Dum iom da tempo la hobitoj povis nek aŭdi nek senti tion, kio ĉagrenis lin. Poste subite haltis ĉiuj tri, rigidiĝante kaj aŭskultante. Al Frodo kaj Sam ŝajnis, ke ili aŭdas, tre malproksime, longan lamentan krion, altan, maldensan kaj kruelan. Ili tremegis. Sammomente la ekmoviĝo de la aero perceptiĝis al ili, kaj iĝis tre froste. Dum ili staris streĉe aŭskultante, ili aŭdis bruon kvazaŭ venton venantan defore. La nebulecaj lumoj ektremis, malbrilis kaj estingiĝis.

Golumo rifuzis moviĝi. Li staris tremante kaj balbutante al si, ĝis abrupte la vento atingis ilin, siblante kaj murmuregante tra la marĉejo. La nokto iĝis malpli nigra, sufiĉe lumeta por ke ili vidu, aŭ duonvidu, senformajn nebuldrivaĵojn kurbiĝantajn kaj tordiĝantajn dum la nebulo transruliĝis ilin kaj preterpasis ilin. Rigardante supren ili vidis la nubojn apartiĝi kaj diseriĝi, kaj poste en la alta sudo la luno estingiĝis flagre, rajdante en la fluga zostero.

Momente tiu vidaĵo feliĉigis la korojn de la hobitoj; sed Golumo kaŭris,

murmurante malbenojn al la Blanka Vizaĝo. Poste Frodo kaj Sam gapante al la ĉielo, profunde enspirante la aeron pli freŝan, vidis ĝian alvenon: nubeto fluganta el la malbenindaj montoj; nigra ombro elsendita el Mordoro; grandega figuro flugilhava kaj minaca. Ĝi peliĝis antaŭ la luno, kaj kun timiga krio foriris okcidenten, pro sia minaca rapido postlasante la venton.

Ili falis antaŭen, tordiĝante senatente sur la malvarma tero. Sed la terurombro giris kaj revenis, jam pasante pli malalte, rekte super ili, viŝante la marĉfetoron per siaj abomenaj flugiloj. Kaj poste ĝi estis for, reflugante al Mordoro je rapideco de la Saŭrona kolero; kaj malantaŭ ĝi la vento formiĝis, lasante la Mortajn Marĉojn dezertaj kaj mornaj. La nudan dezerton, ĝis videblo de la okuloj, eĉ ĝis la fora minaco de la montoj, makuletis la intermita lunlumo.

Frodo kaj Sam stariĝis, frotante siajn okulojn, kvazaŭ infanoj vekitaj el misa sonĝo por retrovi la konatan nokton ankoraŭ kovranta la mondon. Sed Golumo kuŝis sur la tero kvazaŭ senkonsciigite. Ili malfacile rekonsciigis lin, kaj dum kelka tempo li rifuzis levi la vizaĝon, sed kaŭris antaŭen sur la kubutoj, kovrante la malantaŭon de sia kapo per la grandaj plataj manoj.

— Fantomoj! — li ululis. — Fantomoj flugilhavaj! La Trezoro estas ilia mastro. Ili vidas ĉion, ĉion. Nenio kapablas kaŝiĝi antaŭ ili. Malbenatu la Blanka Vizaĝo! Kaj ili rakontas al Li ĉion. Li vidas, Li scias. Aĥ, *golum', golum', golum'*! — Ne ĝis subeniris la luno, fore okcidente post Tol Brandiro, li konsentis stariĝi aŭ moviĝi.

Ekde tiam al Sam ŝajnis, ke ili konstatas denove ŝanĝiĝon en Golumo. Li estis pli flatema kaj amikecon serĉanta; sed Sam ekvidis kelkfoje iujn strangajn esprimojn en liaj okuloj, precipe kiam li rigardis Frodon; kaj li reiris pli kaj pli al sia malnova parolmaniero. Kaj Sam spertis alian kreskantan ĝenon. Frodo ŝajnis laca, lacega preskaŭ elĉerpiĝe. Li diris nenion, fakte li malmulte parolis entute; kaj li ne plendis, sed li marŝis kiel ŝarĝportanto, kies ŝarĝo ĉiam pli peziĝas; kaj li treniĝis, pli kaj pli malrapide, tiel ke Sam ofte devis peti, ke Golumo atendu kaj ne postlasu ilian mastron.

Efektive je ĉiu paŝo al la pordo de Mordoro Frodo sentis la Ringon sur ties ĉeneto ĉirkaŭ la kolo iĝi pli kaj pli peza. Li jam komencis senti ĝin kiel realan pezaĵon, kiu tiris lin teren. Sed lin multe pli ĝenis la Okulo: tiel li nomis ĝin al si. Pli ol trenado de la Ringo, ĝi igis lin kaŭri kaj kurbiĝi dum la marŝado. La Okulo: tiu terura kreskanta sento pri malamika volo, kiu luktis per granda potenco penetri ĉiujn ombrojn de nubo, tero kaj karno por vidi vin: trapingli vin sub ĝia kruela rigardo, nuda, neforigebla. Tiom maldikaj, tiom rompeble maldikaj iĝis la vualoj, kiuj daŭre ĝin forbaris.

Frodo sciis precize, kie estas nun la aktualaj loĝejo kaj kerno de tiu volo: tiel certe kiel oni povas konstati la direkton de la suno per fermitaj okuloj. Li frontis ĝin, kaj ĝia potenco batis lian frunton.

Golumo probable sentis ion similan. Sed kio okazas en lia mizera koro inter premado de la Okulo kaj avido al la Ringo, kiu tiom proksimis, kaj lia sinceda promeso farita duone pro timo pri frida fero, la hobitoj ne povis diveni. Frodo tion neniom pripensis. La menso de Sam okupiĝis ĉefe pri la mastro, apenaŭ rimarkante la malhelan nubon, kiu sentiĝis en la propra koro. Li metis Frodon nun antaŭ sin, kaj zorge rigardis ĉiun lian ekmovon, apogante lin, se li stumblis, kaj provante kuraĝigi lin per mallertaj vortoj.

Kiam la tago fine venis, la hobitoj surpriziĝis, vidante kiom pli proksimaj jam estis la misaŭguraj montoj. La aero estis jam pli klara kaj pli frida, kaj kvankam ankoraŭ foraj, la muroj de Mordoro ne plu estis nubeca minaco rande de l' vidatingo, sed kiel severaj nigraj turegoj ili brovumis tra malĝoja dezerto. La marĉoj finiĝis, formortante je mortaj torfejoj kaj larĝaj ebenaĵoj da seka fendetita koto. La tereno antaŭe leviĝis en longaj malabruptaj deklivoj, malfekundaj kaj senkompataj, al la dezerto kuŝanta antaŭ la Pordego de Saŭrono.

Dum la griza lumo daŭris, ili kaŭris vermece sub nigra ŝtonego, kuntiriĝante pro la ebleco ke la flugilhava teruraĵo preterpasos kaj spionos ilin per siaj kruelaj okuloj. La restaĵo de tiu vojaĝo estis ombro de kreskanta timo, en kiu la memoro povis trovi nenion apogeblan. Dum du pliaj noktoj ili luktis antaŭen tra la velka senvoja tereno. La aero, kiel ŝajnis al ili, raspiĝis kaj pleniĝis je amara fetoro, kiu haltigis ilian spiron kaj malsekigis iliajn buŝojn.

Finfine, en la kvina mateno de kiam ili ekiris kun Golumo, ili ankoraŭfoje haltis. Antaŭ ili malhelaj en la tagiĝo la grandaj montoj etendiĝis al tegmentoj el fumo kaj nubo. El ties subaĵoj estis etenditaj grandegaj murapogiloj kaj malglataj rokoj, kiuj jam estis for apenaŭ dekduon da mejloj. Frodo ĉirkaŭrigardis terurite. Kvankam estis abomenindaj la Mortaj Marĉoj kaj la aridaj terenoj de Nomenlando, multe pli naŭziga estis la tereno, kiun la rampa tago nun malrapide vidigisal liaj timantaj okuloj. Eĉ al la Lago de Mortaj Vizaĝoj venis ia marasma fantomo de verda printempo; sed ĉi tien nek printempo nek somero iam ajn revenus. Ĉi tie vivis nenio, eĉ ne la lepraj kreskaĵoj, kiuj nutras sin per putraĵo. La anhelaj lagetoj estis sufokitaj per cindro kaj rampa koto, morbe blankaj kaj grizaj, kvazaŭ la montoj vomus la malpuraĵon de siaj intestoj al la ĉirkaŭaj terenoj. Altaj amasiĝoj el polvigita premita rokaĵo, grandaj konusoj el grundo fajrdetruita kaj venenmakulita, staris en senfinaj vicoj kvazaŭ obscena tombejo, malrapide vidigita en la nevolonta lumo.

Ili venis jam al la senvivejo kuŝanta antaŭ Mordoro: eterna monumento al la malhela laboro de ĝiaj sklavoj, kiu restos kiam ĉiuj ties celoj nuliĝos; tereno malsanktigita, malsana ekster ĉia kuracado — krom se la Granda Maro elvenus kaj forlavus ĝin en forgesitecon.

— Mi sentas naŭzon, — diris Sam. Frodo ne parolis.

Dum iom da tempo ili staris tie, kiel homoj rande de dormo en kiu embuskas koŝmaro, forbarante ĝin, kvankam ili sciis ke nur tra la ombroj ili povos atingi la matenon. La lumo vastiĝis kaj malmoliĝis. La anhelaj kavoj kaj venenaj teramasoj iĝis hide klaraj. La suno jam supreniris, promenante inter nuboj kaj longaj strioj da fumo, sed eĉ la sunlumo estis malsanktigita. La hobitoj neniun bonvenigon havis por tiu lumo; ĝi ŝajnis malamika, vidigante ilin senrimedaj — etaj pepantaj fantomoj vagantaj inter la cindramasoj de la Malhela Mastro.

Tro lacegaj por pluiri, ili serĉis iun lokon, kie ili povus ripozi. Dum iom da tempo ili sidis senparole sub la ombro de skori-amaso; sed venenaj fumoj likiĝis el ĝi, trafante iliajn gorĝojn kaj sufokante ilin. Golumo la unua stariĝis. Sputante kaj sakrante li leviĝis, kaj sen vorto aŭ ekrigardo al la hobitoj li forrampis kvarpiede. Frodo kaj Sam rampe sekvis lin, ĝis ili venis al larĝa preskaŭ ronda kavo, altflanka okcidente. Tiu estis malvarma kaj morta kun fia flako el oleeca multkolora ŝimo surfunde. En tiu malica truo ili kaŭris, esperante eskapi en ĝia ombro la atenton de l' Okulo.

Tiu tago treniĝis malrapide. Ĝenis ilin forta soifo, sed ili glutis nur kelkajn gutojn el siaj akvujoj, lastfoje plenigitaj en la ravineto, kiu nun, kiam ili retrorigardis pense, ŝajnis loko paca kaj bela. La hobitoj laŭvice sentinelis. Komence, malgraŭ la lacego, neniu el la du kapablis dormi; sed dum la malproksima suno lante descendis al malrapide moviĝanta nubaro, Sam ekdormetis. Estis la vico de Frodo sentineli. Li retroklinis sin al la deklivo de la kavo, sed tio ne faciligis la senton de ŝarĝiteco kiu pezis sur lin. Li suprenrigardis al la fumstriita ĉielo kaj vidis strangajn fantomojn, malhelajn rajdistajn formojn kaj vizaĝojn el la pasinteco. Li ne plu konsciis pri la tempo, ŝvebante inter dormo kaj maldormo, ĝis forgeseco inundis lin.

Subite Sam vekiĝis pensante, ke li aŭdas alvokon de la mastro. Estis vespere. Frodo ne povis alvoki, ĉar li endormiĝis kaj glitis suben preskaŭ ĝis la fundo. Golumo apudis lin. Momente Sam supozis, ke tiu provas veki Frodon; poste li konstatis, ke tiel ne estas. Golumo parolis al si. Smeagolo debatis kun iu alia penso, kiu uzis la saman voĉon sed igis ĝin pepi kaj sibli. Alternis en liaj okuloj dumparole lumo pala kaj lumo verda.

— Smeagolo promesis, — diris la unua penso.

— Jes, jes, trezoro mia, — venis la respondo, — ni promesis: por savi nian Trezoron, ne por ke Li havu ĝin. Neniam. Sed ĝi aliras Lin, jes, ĉiupaŝe

pli proksimen. Kion faros pri ĝi la hobito, ni scivolas, jes ni scivolas.

— Mi ne scias. Mi ne povas malhelpi tion. La mastro havas ĝin. Smeagolo promesis helpi la mastron.

— Jes, jes, helpi la mastron de la Trezoro. Sed se ni estus mastro, ni povus helpi nin mem, jes, kaj ankoraŭ plu plenumi la promesojn.

— Sed Smeagolo diris, ke li tre, tre bonkondutos. Afabla hobito! Li forprenis la kruelan ŝnuron de la kruro de Smeagolo. Li alparolas min afable.

— Tre, tre bonkondutos, ĉu, trezoro mia? Ni bonkondutu, bonkondutu kiel fiŝoj, dolĉulo, sed al ni mem. Ne dolore al la afabla hobito, kompreneble, ne, ne.

— Sed la Trezoro regas la promeson, — la voĉo de Smeagolo kontraŭdiris.

— Do prenu ĝin, — diris la alia, — kaj ni regu ĝin mem! Tiam ni estos la mastro, *golum'*! Devigu la alian hobiton, la malagrablan, suspekteman hobiton, devigu lin rampi, jess, *golum'*!

— Sed ne la afablan hobiton?

— Ho ne, ne dum tio ne plaĉos al ni. Tamen li estas Baginzo, trezoro mia, jes, Baginzo. Ŝtelis ĝin iu Baginzo. Li trovis ĝin kaj li diris nenion, nenion. Ni malamas Baginzojn.

— Ne, ne tiun ĉi Baginzon.

— Jes, ĉiujn Baginzojn. Ĉiujn, kiuj retenas la Trezoron. Ĝin ni devas havi!

— Sed Li vidos, Li scios. Li forprenos ĝin de ni!

— Li vidas. Li scias. Li aŭdis nin stulte promesi, kontraŭe al Liaj ordonoj, jes. Necesas preni ĝin. La Fantomoj serĉadas. Necesas preni ĝin.

— Ne por Li!

— Ne, dolĉulo. Vidu, trezoro mia: se ni havus ĝin, tiam ni povus eskapi, eĉ de Li, ĉu ne? Eble ni tre fortiĝus, iĝus pli fortaj ol la fantomoj. Ĉu mastro Smeagolo? Ĉu Golumo la Granda? *La* Golumo! Manĝi fiŝojn ĉiutage, trifoje tage, freŝajn el la maro. Plej kara Golumo! Devas havi ĝin. Ni deziras ĝin, ni deziras ĝin, ni deziras ĝin!

— Sed ili estas duopo. Ili tro rapide vekiĝos kaj mortigos nin, — plorkriis Smeagolo lasteksplode. — Ne nun. Ankoraŭ ne.

— Ni deziras ĝin! Sed, — sekvis longa paŭzo, kvazaŭ nova penso vekiĝus. — Ankoraŭ ne, ĉu? Eble ne. Ŝi eble helpos. Ŝi eble, jes.

— Ne, ne! Ne tiamaniere! — plorĝemis Smeagolo.

— Jes! Ni deziras ĝin! Ni deziras ĝin!

Ĉiufoje kiam parolis la dua penso, la longa mano de Golumo etendiĝis malrapide, palpante al Frodo, kaj poste estis abrupte retirata, kiam

Smeagolo denove ekparolis. Fine ambaŭ brakoj, kun longaj fingroj fleksitaj kaj tikantaj, grifece iris al lia kolo.

Sam estis kuŝanta senmove, fascinita de tiu debato, sed rigardante ĉiun moviĝon de Golumo el sub la duonfermitaj palpebroj. Laŭ lia simpla menso normala malsato, la deziro manĝi hobitojn, ĝis tiam ŝajnis la ĉefa danĝero en Golumo. Li nun konstatis, ke estas ne tiel: Golumo spertis la teruran alvokon de la Ringo. La Malhela Mastro estis *Li*, kompreneble; sed Sam scivolis, kiu estas *Ŝi*. Unu el la naŭzaj amikoj, kiujn la fiaĵeto trovis dum sia vagado, li supozis. Poste li forgesis pri tiu punkto, ĉar la aferoj jam sufiĉe klare progresis kaj iĝis danĝeraj. Forta pezeco plenigis liajn membrojn, sed li pene vigligis sin kaj sidiĝis. Io avertis, ke li estu singarda kaj ne sciigu, ke li subaŭskultis la debaton. Li eligis laŭtan suspiron kaj larĝe oscedis.

— Kioma horo estas? — li diris dormeme.

Golumo eligis longan siblon inter la dentoj. Li stariĝis momente, streĉita kaj minaca; kaj poste kolapsis, falante antaŭen al kvar piedoj kaj suprengrimpante la deklivon de la kavo.

— Afablaj hobitoj! Afabla Sam! — li diris. — Dormemuloj, jes, dormemuloj! Lasis bonan Smeagolon sentineli! Sed estas vespere. Krepusko alrampas. Jam tempo ekiri.

"Jam pli ol tempo! — pensis Sam. — Kaj jam tempo disiĝi, cetere". Tamen venis al li ekscivolo ĉu ne fakte Golumo estas nun tiel danĝera kiam liberigita kiel retenita.

— Malbenatu li! Mi volas, ke li sufokiĝu! — li murmuris. Li stumblis suben laŭ la deklivo de l' kavo kaj vekis sian mastron.

Sufiĉe strange, Frodo sin sentis freŝigita. Li sonĝadis. Jam pasis la malluma ombro, kaj bela vizio vizitis lin en tiu malsaneca lando. Nenio el ĝi restis en lia memoro, tamen pro ĝi li sentis ĝojon kaj kormalpezon. Lia ŝarĝo malpli pezis sur lin. Golumo bonvenigis lin kun hundeca ĝojo. Tiu gakis kaj babilis, krakigante siajn longajn fingrojn, kaj frapetante la genuojn de Frodo. Frodo ridetis al li.

— Vidu! — li diris. — Vi gvidis nin bele kaj fidele. Jen la lasta stadio. Venigu nin al la Pordego, kaj poste mi ne petos vin pluiri. Venigu nin al la Pordego, kaj vi rajtos iri kien ajn vi deziros, nur ne al niaj malamikoj.

— Al la Pordego, ĉu? — Golumo pepis, ŝajne surprizita kaj timigita. — Al la Pordego, la mastro diras! Jes, tion li diras. Kaj bona Smeagolo faras tion, kion li petas, ho jes. Sed kiam ni pli proksimiĝos, ni vidos eble, ni vidos tiam. Tute ne aspektos agrable. Ho ne! Ho ne!

— Ekiru vi! — diris Sam. — Ni trapasu tion!

En la kreskanta krepusko ili rampgrimpis el la kavo kaj malrapide ekvojis tra la morta tereno. Ne longe ili iris ĝis ili spertis refoje la timon, kiu

inundis ilin, kiam la flugilhava figuro trarapidis super la marĉoj. Ili haltis, kaŭrante sur la fetora tero, sed ili nenion vidis en la morna vespera ĉielo supre, kaj baldaŭ la minaco pasis, altege super la kapoj, irante eble pro ia rapida komisio el Baraduro. Post iom da tempo Golumo leviĝis kaj ree rampis antaŭen, murmurante kaj skuiĝante.

Proksimume unu horon post la noktomezo la timo inundis ilin jam la trian fojon, sed nun ĝi ŝajnis pli fora, kvazaŭ ĝi trapasus super la nubaro, terure rapidegante okcidenten. Tamen Golumo estis senhelpe terurita kaj konvinkiĝis, ke ili estas persekutataj, ke ilia proksimiĝo estas konata.

— Trifoje! — li plorkriis. — Trifoje estas minaco. Oni sentas nin ĉi tie, oni sentas la Trezoron. La Trezoro estas ilia mastro. Ni ne povas pluiri ĉivoje, ne. Senutile, senutile!

Petegado kaj afablaj vortoj ne plu efikis. Nur kiam Frodo ordonis lin kolere kaj metis sian manon al la glavtenilo, Golumo konsentis denove leviĝi. Li leviĝis graŭlante, kaj iris antaŭ ili kvazaŭ vipita hundaĉo.

Do ili stumblis plu dum la laca fino de la nokto, kaj ĝis la alveno de alia timoplena tago ili marŝis silente kun klinitaj kapoj, vidante nenion, kaj aŭdante nenion krom la venton siblantan en iliaj oreloj.

3

La Nigra Pordego estas fermita

La postan tagon antaŭ la tagiĝo ilia vojaĝo al Mordoro finiĝis. La marĉoj kaj la dezerto troviĝis malantaŭe. Antaŭ ili, malhelante antaŭ palaĉa ĉielo, la grandaj montoj levis siajn minacajn kapojn.

Okcidente de Mordoro etendiĝis la morna linio de Efelo Duad, la Ombraj Montoj, kaj norde la malebenaj pintoj kaj sterilaj firstoj de Eredo Litui, cindre grizaj. Sed proksimiĝante unu al alia, ĉar ili ja estis nur partoj de unu granda muro ĉirkaŭ la melankoliaj ebenaĵoj de Litlado kaj de Gorgoroto, kun meze la maldolĉa enlanda maro Nurneno, ili elpuŝis longajn brakojn norden; kaj inter tiuj brakoj estis profunda interkrutejo. Tiu estis Cirito Gorgor, la Hantata Trapasejo, la eniro al la lando de l' Malamiko. Altaj klifoj malserenis ambaŭflanke, kaj ĉe la enirejo estis du apikaj montetoj, nigr-ostaj kaj nudaj. Sur ili staris la Dentoj de Mordoro, du turegoj fortikaj kaj altaj. Dum epoko longe pasinta ilin konstruis la gondoranoj en siaj fiero kaj potenco, post la pereigo de Saŭrono kaj ties forfuĝo, por eviti ke li revenu al sia antaŭa regno. Sed la fortiko de Gondoro velkis, kaj homoj dormis, kaj dum multaj jaroj la turegoj staris malplenaj. Poste Saŭrono revenis. Nun la sentinelaj turegoj, kiuj kadukiĝis, estis riparitaj, kaj plenigitaj je armiloj, kaj garnizonitaj de senĉesa atentemo. Ŝtonvizaĝaj ili estis, kun malhelaj fenestroj-truoj vaĉantaj norden, orienten kaj okcidenten, kaj ĉiu fenestro estis plenigita de okuloj sendormaj.

Trans la enirejon de l' pasejo, de klifo al klifo, la Malhela Mastro konstruigis ŝtonan remparon. En ĝi estis unu pordego el fero, kaj sur ĝia krenelaro paŝis senĉese sentineloj. Sub la montetoj ambaŭflanke estis enborita cento da kavernoj kaj truoj; tie embuskis bandego da orkoj pretaj eliri je signalo kvazaŭ nigraj formikoj batalontaj. Neniu povis trapasi la Dentojn de Mordoro ne spertinte ties mordon, krom se ili estis alvokitaj de Saŭrono aŭ konis la sekretajn pasvortojn, kiuj malfermis Moranonon, la Nigran Pordegon de lia lando.

La du hobitoj rigardis senespere la turegojn kaj la muron. Eĉ de malproksime ili povis vidi en la malforta lumo la moviĝon de sentineloj sur la muro kaj la patrolojn antaŭ la pordego. Ili nun kuŝis rigardante trans la randon de rokeca kavo sub la etendiĝa ombro de la plej norda murapogilo de Efelo Duad. Flugante tra l' peza aero en rekta linio korvo, eble, transflugus nur cent klaftojn de ilia kaŝloko ĝis la alta pinto de la pli

proksima turego. Maldensa fumo kirliĝis super ĝi, kvazaŭ fajro ardus en la monteto sube.

Tagiĝis, kaj la pale ruĝa suno palpebrumis tra la senvivaj firstoj de Eredo Litui. Tiam subite aŭdiĝis bleko de latungorĝaj trumpetoj: el la gardoturoj ili bruis, kaj fore el kaŝitaj sekurejoj kaj antaŭpostenoj sur la montoj venis respondaj signaloj; kaj pli fore, granddistancaj sed profundaj kaj minacantaj reeĥis en la kava tereno malantaŭe la potencaj kornoj kaj tamburoj de Baraduro. Ankoraŭ unu terura tago de timo kaj penado estis veninta al Mordoro; kaj la noktaj sentineloj estis vokitaj al siaj kelaj ĉeloj kaj profundaj haloj, kaj la tagaj sentineloj, fiokulaj kaj kruelaj, marŝadis al siaj postenoj. Ŝtalo ekbrilis malforte sur la krenelaro.

— Nu, jen ni alvenis! — diris Sam. — Jen la Pordego, kaj ŝajnas al mi, ke tie estas la proksimuma limo ĉiama de nia vojaĝo. Al kukolo, sed la Avulo volus diri unu-du aferojn, se li vidus min nun! Ofte li diris, ke mi trafos misan finon, se mi ne paŝos singarde, tion li diris. Sed mi jam ne supozas iam revidi la maljunan bonulon. Li malhavos okazon diri: "Mi ja avertis vin, Sam". Des pli domaĝe. Li rajtus admoni min ĝis elĉerpiĝus lia spiro, se nur mi povus revidi lian maljunan vizaĝon. Sed mi devus unue energie lavi min, aŭ li ne rekonus min. Supozeble senutilas demandi: "Kiun vojon ni sekvu?" Ni ne povas pluiri, krom se ni emus peti transporton de la orkoj.

— Ne, ne! — diris Golumo. — Senutile. Ni ne povas pluiri. Smeagolo diris tion. Li diris: ni iros al la Pordego, kaj poste ni vidos. Kaj ni ja vidas. Ho jes, mia trezoro, ni ja vidas. Smeagolo sciis, ke la hobitoj ne povus iri tiun vojon. Ho jes, Smeagolo sciis.

— Do, kial, je la plago, vi kondukis nin ĉi tien? — demandis Sam, ne sentante sin en humoro esti justa aŭ racia.

— La mastro diris tion. La mastro diris: Konduku nin al la Pordego. Do, bona Smeagolo tion faris. La mastro diris tion, saĝa mastro.

— Tion mi faris, — diris Frodo. Lia vizaĝo estis serioza kaj rigida, sed rezoluta. Li estis malpuraĉa, marasma, kaj kuntirita pro lacego, sed li ne plu kaŭris, kaj liaj okuloj estis klaraj. — Mi diris tion, ĉar mi intencas eniri Mordoron, kaj alian vojon mi ne konas. Tial mi iros ĉi-voje. Mi ne petas iun ajn akompani min.

— Ne, ne, mastro! — ululis Golumo, manfrapetante lin kaj ŝajne tre malĝojigita. — Senutilas tiumaniere! Senutilas! Ne donu al Li la Trezoron. Li formanĝos nin ĉiujn, se Li akiros ĝin, formanĝos la tutan mondon. Retenu ĝin, afabla mastro, kaj traktu bonkore Smeagolon. Ne lasu, ke Li havu ĝin. Aŭ foriru, iru al agrablaj lokoj, kaj redonu ĝin al la eta Smeagolo. Jes, jes, mastro: redonu ĝin, ĉu ne? Smeagolo tenos ĝin sekura; li faros

multe da bono, precipe al la afablaj hobitoj. La hobitoj iru hejmen. Ne iru al la Pordego!

— Al mi estis ordonite iri al la lando Mordoro, kaj sekve mi iros, — diris Frodo. — Se ekzistas nur unu maniero, mi devas iri tiumaniere. Kio sekvos, devos sekvi.

Sam diris nenion. La esprimo sur la vizaĝo de Frodo sufiĉis al li; li sciis, ke liaj vortoj senutilos. Kaj finfine li neniam ekde la komenco vere esperis pri la afero; sed estante bonhumora hobito li ja ne bezonis esperon, dum malespero estis prokrastita. Nun ili alvenis la amaran finon. Sed li subtenis sian mastron tra la tuta vojo; ĉefe por tio li venis, kaj li daŭre subtenos lin. Lia mastro ne eniros sola Mordoron. Sam akompanos lin, kaj ĉiuokaze ili liberiĝos de Golumo.

Tamen Golumo ankoraŭ ne intencis liberigi ilin. Li genuis antaŭ la piedoj de Frodo, tordante siajn manojn kaj kvikante.

— Ne tiun vojon, mastro! — li petegis. — Ekzistas alia vojo. Ho jes, vere ekzistas. Alia vojo, pli senluma, pli malfacile trovebla, pli sekreta. Sed Smeagolo konas ĝin. Lasu ke Smeagolo montru ĝin al vi!

— Ĉu alia vojo? — diris Frodo dubeme, subengrimpante al Golumo per la esploraj okuloj.

— Jess! Jess, efektive! Ekzist*i*s alia vojo. Smeagolo trovis ĝin. Ni iru vidi, ĉu ĝi plu troviĝas!

— Pri tio vi ne diris pli frue.

— Ne. La mastro ne demandis. La mastro ne diris, kion li intencas fari. Li ne sciigis al kompatinda Smeagolo. Li diris: Smeagolo, konduku min al la Pordego, kaj tiam adiaŭ! Smeagolo rajtas forkuri kaj konduti bone. Sed nun li diras: Mi celas eniri Mordoron ĉi-voje. Do, Smeagolo tre timas. Li ne volas perdi sian afablan mastron. Kaj li promesis, la mastro devigis lin promesi, savi la Trezoron. Sed la mastro portos ĝin al Li, rekte al la Nigra Mano, se la mastro iros ĉi-voje. Do, Smeagolo devas savi ilin ambaŭ, kaj li pensas pri alia vojo, kiu estis pli frue. Afabla mastro. La bonkonduta Smeagolo ĉiam helpas.

Sam sulkigis la frunton. Se li kapablus bori truojn en Golumo per siaj okuloj, li farus tion. Lia menso estis duboplena. Laŭaspekte Golumo vere malfeliĉis kaj ege volis helpi Frodon. Sed Sam, memorante la subaŭskultitan debaton nur malfacile povis kredi, ke la longe submergita Smeagolo estis venkinta: tiu voĉo ĉiuokaze ne ricevis la lastan vorton en la debato. Sam supozis, ke la Smeagola kaj la Goluma duonoj (aŭ kiel li mense nomis ilin: Putorulo kaj Fetorulo) faris militpaŭzon kaj portempan aliancon. Neniu el ambaŭ deziris, ke la Malamiko akiru la Ringon; ambaŭ volis defendi Frodon de kaptiĝo kaj laŭeble longe observadi lin — almenaŭ tiel

longe, kiel Fetorulo havus eblecon preni sian “Trezoron”. Ke fakte estis alia vojo en Mordoron, Sam pridubis.

“Estas tre bone, ke neniu el la du duonoj scias, kion intencas fari la mastro, — li pensis. — Se li scius, ke sinjoro Frodo klopodas meti finon al lia Trezoro por ĉiam, sufiĉe rapide ekestus problemoj, mi vetas. Ĉiuokaze, la olda Fetorulo tiom timas la Malamikon — kaj li estas ordonata iel de tiu, aŭ ordonita — ke li transdonus nin prefere ol rimarkiĝi helpante nin; kaj prefere ol lasi ke lia Trezoro fandiĝu, eble. Almenaŭ tiel mi konceptas. Kaj mi esperas, ke la mastro pripensos zorge la aferon. Li tre saĝas, sed li estas molkora, jen kia li estas. Ne eblas al ajna Vato diveni, kion li faros tujsekve”.

Frodo ne tuj respondis al Golumo. Dum tiuj duboj trapasis la malrapidan sed sagacan menson de Sam, li staris elrigardante al la malhela klifo de Cirito Gorgor. La kavo, en kiu ili rifuĝis, estis elfosita sur flanko de malalta monteto kaj troviĝis iom alte super la ebenaĵa nivelo. Longa tranĉeeca valo etendiĝis inter ĝi kaj la eksteraj murapogiloj de la monta muro. En la matenlumo la vojoj, kiuj konverĝis al la Pordego de Mordoro, estis nun klare videblaj, palaj kaj polvokovritaj; unu reserpentumis norden; alia mallarĝumis orienten en la nebuletojn kroĉiĝantajn al la suboj de Eredo Litui; kaj alia abrupte kurbiĝanta pasis proksime sub la okcidenta vaĉturo, kaj poste laŭiris la valon sube de la montflanko, kie kuŝis la hobitoj, je ne multaj futoj sub ili. Baldaŭ ĝi turniĝis, flankumante la montoŝultrojn kaj foriris suden en la profundajn ombrojn, kiuj komplete mantelis la okcidentajn flankojn de Efelo Duad; preter ilia vidkapablo ĝi plu daŭris en la malvastan terenon inter la montoj kaj la Granda Rivero.

Rigardante, Frodo konsciiĝis, ke okazas grandaj ekvigliĝo kaj moviĝado sur la ebenaĵo. Estis kvazaŭ tutaj armeoj ekmarŝus, kvankam grandparte ilin kaŝis la vaporoj kaj fumoj drivantaj de la marĉejoj kaj dezertoj pli fore. Sed jen kaj jen li ekvidis brileton de lancoj kaj kaskoj; kaj sur la ebenaĵoj apudvojaj estis videblaj en multaj rotoj rajdistoj. Li memoris sian vizion deforan sur Amono Hen, antaŭ tiel malmulte da tagoj, kvankam tio jam ŝajnis antaŭ multaj jaroj. Tiam li sciis, ke la espero dum unu neprudenta momento ekflagrinta en lia koro estis vana. La trumpetoj blekis ne defie, sed salute. Tio ne estis atako kontraŭ la Malhela Mastro fare de gondoraj viroj, leviĝintaj kiel venĝaj fantomoj el la tomboj de braveco jam delonge forpasinta. Tiuj estis viroj alirasaj el la vasta oriento, kunvenantaj laŭ la alvoko de sia Komandanto; armeoj, kiuj bivakis nokte antaŭ lia Pordego kaj nun almarŝis por pligrandigi lian kreskantan potencon. Kvazaŭ subite konsciigite plene pri la danĝero de ilia situacio, solaj, en la plifortiĝanta taglumo, tiel proksime al tiu granda minaco, Frodo abrupte tiris sian grizan

kapuĉon pli strikte sur la kapon, kaj paŝis suben en la fendejon. Tiam li turnis sin al Golumo.

— Smeagolo, — li diris, — mi fidos vin ankoraŭfoje. Efektive ŝajnas, ke mi devas fari tion, kaj ke mia sorto estas ricevi helpon de vi, kie mi malpleje atendas ĝin, kaj via sorto estas helpi min, kiun vi longe persekutis malicintence. Ĝis nun vi meritas bonon ĉe mi kaj plenumis vian promeson vere. Mi diras vere kaj sincere, — li aldonis, ekrigardinte al Sam, — ĉar jam dufoje ni estis sub via potenco, kaj vi faris al ni neniun malutilon. Vi ankaŭ ne provis forpreni de mi tion, kion vi iam serĉadis. Ke la tria fojo pruviĝu la plej bona! Sed mi avertas vin, Smeagolo, ke vi estas minacata.

— Jes, jes, mastro! — diris Golumo. — Terure minacata! La ostoj de Smeagolo tremas, kiam li pensas pri tio, sed li ne forkuras. Li devas helpi la afablan mastron.

— Mi aludis ne la minacon, kiun ni ĉiuj partoprenas, — diris Frodo. — Mi aludas minacon nur por vi. Vi ĵuris promeson je tio, kion vi nomas la Trezoro. Memoru tion! Ĝi devigos vian plenumon; sed ĝi serĉos rimedon tordi vin je via propra malavantaĝo. Jam vi estas tordata. Vi ĵus vidigis vin al mi, stulte. “Redonu ĝin al Smeagolo”, — vi diris. Neniam plu diru tion! Ne permesu, ke tiu penso kresku en vi! Vi neniam rericevos ĝin. Sed la deziro por ĝi eble perfidos vin al sorto amara. Vi neniam rericevos ĝin. En ekstrema neceso, Smeagolo, mi surmetos la Trezoron; kaj la Trezoro sklavigis vin antaŭ longe. Se mi, surmetinte ĝin, ordonus al vi, vi obeus, eĉ se temus, ke vi saltu desur krutegaĵo aŭ jetiĝu en fajron. Kaj tia estus mia ordono. Do, gardu vin, Smeagolo!

Sam rigardis sian mastron kun aprobo, sed ankaŭ kun surprizo: sur ties vizaĝo estis esprimo kaj en lia voĉo tono, kiujn li neniam antaŭe konis. Ĉiam li pensis, ke la bonkoreco de kara sinjoro Frodo estas tiel altnivela, ke ĝi devas implici sufiĉan kvanton da blindeco. Kompreneble li ankaŭ kredis neakordigeble, ke sinjoro Frodo estas la plej saĝa en la mondo (eble escepte de maljuna sinjoro Bilbo kaj de Gandalfo). Golumo propramaniere, kaj multe pli pardoninde, ĉar li konis lin multe malpli longe, eble eraris simile, misprenante bonkorecon kaj blindecon. Ĉiuokaze tiu parolado konfuzis kaj teruris lin. Li kaŭris submetiĝe sur la tero kaj povis prononci neniujn klarajn vortojn krom “afabla mastro”.

Frodo atendis pacience kelkan tempon, poste li denove parolis malpli severe.

— Ek jam, Golumo aŭ Smeagolo, se vi volas, rakontu al mi pri tiu alia vojo, kaj montru al mi, se vi povas, kia espero estas en ĝi sufiĉa por pravigi mian devion de mia evidenta pado. Mi hastas.

Sed Golumo estis en kompatinda stato, kaj la minaco de Frodo tute

senmedoligis lin. Ne facile estis eligi el li iun klaran mesaĝon, inter la murmuroj kaj kvikoj, kaj la oftaj interrompoj, dum kiuj li rampis sur la tero kaj petegis, ke ili ambaŭ afablu al “povra eta Smeagolo”. Post iom da tempo li iomete plitrankviliĝis, kaj Frodo komprenis, pecon post peco, ke se vojaĝanto sekvas la vojon, kiu turniĝas okcidente de Efelo Duad, li venas iam al vojkruco en cirklo de malhelaj arboj. La dekstra vojo iras al Osgiliado kaj la pontoj de Anduino; la meza vojo daŭre iras suden.

— Plu, plu, plu, — diris Golumo. — Ni neniam iris tiun vojon, sed oni diras, ke ĝi etendiĝas cent leŭgojn, ĝis oni povas vidi la Grandan Akvon, kiu neniam senmovas. Tie troviĝas multe da fiŝoj, kaj grandaj birdoj manĝas fiŝojn: afablaj birdoj; sed ni neniam iris tien, ho ve! Ni neniam havis okazon. Kaj pli fore estas aliaj landoj, oni diras, sed la Flava Vizaĝo tie tre varmegas, kaj malofte estas nuboj, kaj la homoj atakemas kaj havas nigrajn vizaĝojn. Ni ne volas vidi tiun landon.

— Ne! — diris Frodo. — Sed ne deviu de via vojo. Kio pri la tria direkto?

— Ho jes, ho jes, ekzistas la tria vojo, — diris Golumo. — Tiu estas la vojo maldekstren. Tuj ĝi komencas supreniri, supren, retroserpentume kaj regrimpante al la altaj ombroj. Kiam ĝi ĉirkaŭiras la nigran rokon, vi vidos ĝin, subite vi vidos ĝin super vi, kaj vi deziros kaŝiĝi.

— Vidos ĝin, vidos ĝin? Kion oni vidos?

— La malnovan fortikaĵon, tre malnovan, nun tre teruran. Ni kutimis aŭdi rakontojn el la sudo, kiam Smeagolo estis juna, antaŭlonge. Ho jes, ni kutimis rakonti multajn historiojn vespere, sidante sur la bordoj de la Granda Rivero, en la salikejoj, kiam ankaŭ la Rivero pli junis, *golum', golum'*. — Li komencis plori kaj murmuri. La hobitoj pacience atendis. Golumo daŭrigis. — Rakontoj el la sudo pri la altaj homoj kun brilaj okuloj, kaj la domoj similaj al montetoj da ŝtono, kaj la arĝenta krono de ilia reĝo kaj ties Blanka Arbo. Mirindaj rakontoj. Ili konstruis tre altajn turegojn, kaj unu el ili estis arĝentblanka, kaj en ĝi estis ŝtono lunsimila, kaj ĉirkaŭ ĝi estis grandaj blankaj muroj. Ho jes, estis multaj rakontoj pri la Turego de la Luno.

— Certe ĝi estis Minaso Itil, kiun konstruis Isilduro, filo de Elendilo, — diris Frodo. — Ĝuste Isilduro fortranĉis la fingron de la Malamiko.

— Jes, Li havas nur kvar sur la Nigra Mano, sed tiuj sufiĉas, — diris Golumo tremegante. — Kaj Li malamis la urbon de Isilduro.

— Kion li ne malamas? — diris Frodo. — Sed kiel koncernas nin la Turego de la Luno?

— Nu, mastro, tie ĝi estis kaj tie ĝi estas: la alta turego kaj la blankaj domoj kaj la muro; sed nun ne agrablaj, ne belaj. Li venkis ĝin antaŭlonge.

Nun ĝi estas loko tre terura. Vojaĝantoj ektremas vidante ĝin, ili kaŝe forrampas, ili evitas ĝian ombron. Sed la mastro devos iri tiun vojon. Tiu estas la sola alia vojo. Ĉar tie malpli altas la montoj, kaj la malnova vojo daŭre supreniras, ĝis ĝi alvenas malhelan trapasejon ĉe la supro, kaj poste ĝi ree iras suben, suben al Gorgoroto. — Lia voĉo iĝis flustro kaj li tremegis.

— Sed kiamaniere tio helpos nin? — demandis Sam. — Certe la Malamiko scias ĉion pri siaj propraj montoj, kaj tiu vojo estos gardata same atente kiel ĉi tiu? La turego ne malplenas, ĉu?

— Ho ne, ne malplenas! — flustris Golumo. — Ĝi ŝajnas malplena, sed ĝi ne estas, ho ne! Tre timigaj estaĵoj loĝas tie. Orkoj, jes ĉiam orkoj; sed estaĵoj pli malbonaj, pli malbonaj, ankaŭ loĝas tie. La vojo supreniras ĝuste sub la ombro de l' muroj kaj pasas la pordon. Nenio moviĝas sur la vojo, sen ke ili scias. La estaĵoj interne scias: la Silentaj Vaĉantoj.

— Do estas via konsilo, — diris Sam, — ke ni iru alian longan vojon suden, trovonte nin en simila kaĉo aŭ pli malbona, kiam ni venos tien, se entute ni alvenos, ĉu?

— Ne, vere ne, — diris Golumo. — La hobitoj devas vidi, devas klopodi kompreni. Li ne atendas atakon tiudirekte. Lia Okulo estas ĉie ĉirkaŭe, sed ĝi atentas iujn lokojn pli ol aliajn. Li ne povas vidi ĉion samtempe, ankoraŭ ne. Vidu, Li jam venkis la tutan terenon okcidente de la Ombraj Montoj ĝis la Rivero, kaj Li nun posedas ĉiujn pontojn. Li pensas, ke neniu povas alveni la Lunturegon ne batalinte ĉe la pontoj aŭ akirinte multajn boatojn, kiujn ili ne povas kaŝi, kaj Li scios pri tio.

— Vi ŝajnas scii multon pri Liaj faroj kaj pensoj, — diris Sam. — ĉu vi alparolis Lin lastatempe? Aŭ nur pasigis la tempon kun orkoj?

— Hobito ne afabla, ne sagaca, — diris Golumo, direktante al Sam koleran rigardon kaj turnante sin al Frodo. — Smeagolo alparolis orkojn, jes kompreneble, antaŭ ol renkonti la mastron, kaj multajn aliajn: li longe marŝadis. Kaj tion, kion li diras nun, tion diris multaj personoj. Ĝuste ĉi tie en la nordo troviĝas la plej granda danĝero por Li, kaj por ni. Li elvenos tra la Nigra Pordego iun tagon, iun tagon baldaŭ. Tio estas la sola vojo, laŭ kiu povas veni grandaj armeoj. Sed fore okcidente Li ne timas, kaj tie estas la Silentaj Vaĉantoj.

— Ĝuste tiel! — diris Sam, ne forturnite. — Kaj do ni devas almarŝi kaj frapi ĉe ilia pordo kaj demandi, ĉu ni sekvas la ĝustan vojon al Mordoro? Aŭ ĉu ili tro silentas por respondi? Ne estas sagace. Same efikus fari tion ĉi tie kaj ŝpari al ni longan plandadon.

— Ne ŝercu pri tio, — siblis Golumo. — Ne estas ridige, ho ne! Ne amuze. Ne estas sagace provi entute eniri Mordoron. Sed se la mastro diras: "Mi devas iri", aŭ: "Mi intencas iri", li sekve devas provi iamaniere. Sed li

devas ne iri al la terura urbo, ho ne, kompreneble ne. Guste pri tio Smeagolo helpas, afabla Smeagolo, kvankam neniu sciigas al li, pri kio temas. Smeagolo ree helpas. Li trovis ĝin. Li konas ĝin.

— Kion vi trovis? — demandis Frodo. Golumo kaŭris kaj denove lia voĉo flustriĝis.

— Padeton kondukantan supren en la montaron, kaj poste ŝtuparon, mallarĝan ŝtuparon, ho jes, tre longan kaj mallarĝan. Kaj poste pliajn ŝtupojn. Kaj poste... — lia voĉo eĉ pli mallaŭtiĝis, — tunelon, malluman tunelon; kaj fine etan fendejon, kaj padon alte super la ĉefa trapasejo. Tiuvoje Smeagolo sukcesis eliri el la mallumo. Sed tio estis antaŭ jaroj. La pado eble jam malaperis; sed eble ne, eble ne.

— Tiuj vortoj tute ne plaĉas al mi, — diris Sam. — Ili sonas tro facile, almenaŭ laŭ la rakonto. Se tiu pado ankoraŭ ekzistas, ankaŭ ĝi estos gardata. Ĉu ĝi estis gardata, Golumo? — Dirante tion li ekvidis, aŭ pensis ekvidi, verdan ekbrilon en l' okulo de Golumo. Golumo murmuris, sed ne respondis.

— Ĉu ĝi estas gardata? — demandis Frodo severe. — Kaj ĉu vi *eskapis* el la mallumo, Smeagolo? Ĉu ne prefere, ke oni permesis al vi foriri, pro komisio? Tion efektive supozis Aragorno, kiu trovis vin apud la Mortaj Marĉoj antaŭ jaroj.

— Estas mensogo! — siblis Golumo, kaj venis malica lumo al liaj okuloj pro la nomo Aragorno. — Li mensogis pri mi, jes li mensogis. Mi ja eskapis, per miaj propraj povraj rimedoj. Fakte oni diris, ke mi serĉu la Trezoron, kaj mi serĉis, serĉadis, ja kompreneble. Sed ne por la Nigrulo. La Trezoro estas nia, estis mia, mi diras al vi. Mi ja eskapis.

Frodo havis strangan certecon, ke pri tiu ĉi afero Golumo ĉi-foje ne tiom malproksimas de la vero, kiom oni povus suspekti; ke li iel trovis vojon el Mordoro kaj almenaŭ kredis, ke tio ŝuldiĝis al la propra ruzemo. Ekzemple, li rimarkis, ke Golumo uzis "mi", kaj tio ŝajnis kutime signo, kiu malofte aperis, ke iuj restaĵoj de malnovaj vero kaj sincero momente superis. Frodo ne forgesis pri la ruzaĵoj de la Malamiko. La "eskapo" povis esti permesita aŭ aranĝita, kaj bone konata en la Malhela Turego. Kaj ĉiuokaze Golumo evidente multon rezervis.

— Mi demandas denove, — li diris: — ĉu tiu sekreta vojo ne estas gardata?

Sed la nomo Aragorno igis Golumon malbonhumora. Li alprenis mienon sinkompatan de mensogulo suspektata, kiam escepte li diris la veron aŭ parton el ĝi. Li ne respondis.

— Ĉu ĝi estas gardata? — Frodo ripetis.

— Jes, jes, eble. Mankas sendanĝeraj lokoj en tiu ĉi lando, — diris

Golumo paŭteme. — Mankas sendanĝeraj lokoj. Sed la mastro devas provi tion aŭ reiri hejmen. Mankas alia vojo.

Ili ne povis persvadi lin diri pli. La nomon de la danĝera loko kaj la alta pasejo li ne sciis, aŭ ne volis diri. Ĝia nomo estis Cirito Ungol, tre misfama nomo. Aragorno eble sciigus al ili tiun nomon kaj ĝian signifon; Gandalfo avertus ilin. Sed ili estis solaj, kaj Aragorno estis tre fora, kaj Gandalfo staris meze de l' ruino de Isengardo kaj luktis kun Sarumano, malhelpite de perfidoj. Tamen ĝuste kiam li diris siajn lastajn vortojn al Sarumano, kaj la *palantiro* falis fajre sur la ŝtuparon de Ortanko, liaj pensoj ĉiam direktiĝis al Frodo kaj Samsaĝo, tra la longaj leŭgoj lia menso serĉis ilin espere kaj kompate.

Eble Frodo sentis tion senscie, kiel okazis sur Amono Hen, malgraŭ tio, ke li kredis Gandalfon forpasinta, forpasinta por ĉiam en la ombron de Morio tre malproksime. Li sidis sur la tero dum longa tempo, silenta, kun la klinita kapo, klopodante rememori ĉion, kion Gandalfo diris al li. Sed por la aktuala elekto li memoris neniun konsilon. Efektive, la gvido de Gandalfo estis forprenita de ili tro frue, tro frue, dum la Malhela Lando estis ankoraŭ tre malproksima. Kiel ili enirus ĝin finfine, tion Gandalfo ne diris. Eble li ne povis diri. En la fortikaĵon de l' Malamiko en la nordo, en Dol Gulduron, li iam riskis. Sed en Mordoron, al la Fajromonto kaj al Baraduro, de kiam la Malhela Mastro repotenciĝis, ĉu li iam vojaĝis tien? Al Frodo ŝajnis, ke ne. Kaj jen li, eta duonulo de l' Provinco, simpla hobito el la kamparo, de kiu oni atendis, ke li trovu vojon tie, kien ne povis, aŭ ne aŭdacis iri, la granduloj. Tio estis sorto malica. Sed li akceptis ĝin en sia propra gastoĉambro dum malproksima printempo de alia jaro, jam tiel fora, ke ĝi similis ĉapitron en romano pri la juneco de l' mondo, kiam ankoraŭ floris la Arboj Arĝenta kaj Ora. Tiu ĉi estas misa elekto. Kiun vojon li elektu? Kaj se ambaŭ kondukus al teruro kaj morto, kiom valoras elekto?

La tago progresis. Profunda silento inundis la etan grizan kavon en kiu ili kuŝis, tiom proksime al la lando de timo: silento kvazaŭ ĝi estus densa vualo, kiu forbaris ilin de la tuta ĉirkaŭa mondo. Supre estis kupolo de pala ĉielo striita per momentaj fumoj, sed tio ŝajnis alta kaj tre malproksima, kvazaŭ vidata tra grandaj profundaĵoj de aero peza je meditema pensado.

Eĉ aglo ŝvebanta antaŭ la suno ne vidus de tie la sidantajn hobitojn sub pezo de la sorto, silentajn, ne moviĝantajn, volvitajn per siaj grizaj manteloj. Ĝi eble paŭzus momente por atenti Golumon, etan figuron diskuŝantan sur la tero kvazaŭ skeleto de malsatmortinta homido, kies ĉifona vestaĵo ankoraŭ kroĉiĝas al ĝi, kies longaj brakoj kaj kruroj, preskaŭ oste blankas kaj oste maldikas: sen groŝvaloro da karno.

La kapo de Frodo estis klinita al la genuoj, sed Sam kliniĝis surdorsen,

kun la manoj malantaŭ la kapo, rigardante el sia kapuĉo al la malplena ĉielo. Almenaŭ dum longa tempo ĝi estis malplena. Tiam post kelka tempo Sam pensis vidi malhelan birdosimilan formon giri en la cirklo de lia vidkampo, poste ŝvebi kaj forgiri. Sekvis du aliaj, kaj poste la kvara. Ili estis laŭvide tre malgrandaj, tamen iel li sciis, ke ili estas enormaj, kun larĝa etendiĝo de flugiloj, flugantaj tre alte. Li kovris siajn okulojn kaj kliniĝis antaŭen, kaŭre. Lin plenigis la sama averta timo, kian li spertis en ĉeesto de la Nigraj Rajdantoj: la senrimeda teruro, kiu alvenis kun la krio en la vento kaj la ombro sur la luno, kvankam nun ĝi ne estis tiom prema aŭ pela. La minaco estis pli forega, sed ĝi estis minaco. Ankaŭ Frodo sentis ĝin. Lia pensado estis interrompita. Li ekmoviĝis kaj tremeris, sed li ne rigardis supren. Golumo kuntiriĝis kvazaŭ atakota araneo. La flugantaj figuroj giradis kaj rapide zomis suben, hastante reen al Mordoro. Sam enspiris profunde.

— La Rajdantoj denove aktivas, supre en la aero, — li diris per raŭka flustro. — Mi vidis ilin. Ĉu vi opinias, ke ili povis vidi nin? Ili estis tre altaj. Kaj se ili estas la Nigraj Rajdantoj, samaj kiel antaŭe, do ili ne povis vidi multon en taglumo, ĉu?

— Ne, eble ne, — diris Frodo. — Sed iliaj ĉevaloj povis vidi. Kaj tiuj flugilhavaj estaĵoj, sur kiuj ili nun rajdas, probable vidas pli ol ajnaj aliaj kreitaĵoj. Ili similas grandajn karnomanĝajn birdojn. Ili serĉas ion: la Malamiko vaĉas, timeble.

La timosento pasis, sed la volvanta silento estis frakasita. Jam de kelka tempo ili estis forbaritaj de la mondo, kvazaŭ sur nevidebla insulo; jam ili estis denove nudigitaj, revenis la danĝero. Sed Frodo ankoraŭ ne alparolis Golumon, nek difinis sian elekton. Liaj okuloj estis fermitaj, kvazaŭ li sonĝus aŭ rigardus internen al siaj koro kaj memoro. Finfine li ekmoviĝis kaj stariĝis, kaj ŝajnis, ke li estas parolonta kaj decidonta. Sed li diris:

— Aŭskultu! Kio estas tio?

Ilin inundis nova timo. Ili aŭdis kantadon kaj raŭkan kriadon. Unue tio ŝajnis tre malproksima, sed ĝi proksimiĝis: ĝi estis venanta al ili. Saltis en iliajn mensojn, ke la Nigraj Flugantoj rimarkis ilin kaj sendis armitajn soldatojn por kapti ilin: neniu rapido ŝajnis troa por tiuj teruraj servistoj de Saŭrono. Ili kaŭris aŭskultante. La voĉoj kaj la tintado de armiloj kaj kirasoj tre proksimis. Frodo kaj Sam elingigis siajn glavetojn. Fuĝo estis neebla.

Golumo leviĝis malrapide kaj rampis insektece al la rando de la kavo. Tre singarde li levis sin colon post colo, ĝis li povis rigardi transen inter du rompitaj ŝtonpintoj. Li restis tie senmove dum kelka tempo, neniom bruante. Baldaŭ la voĉoj komencis denove forpasi, kaj poste ili malrapide forvelkis. En la foro sonis trumpeto sur la remparo de Moranono. Golumo kviete retroiris kaj glitis suben en la kavon.

— Pliaj homoj iras al Mordoro, — li diris malaltvoĉe. — Malhelaj vizaĝoj. Tiajn homojn ni ne vidis antaŭe, ne, Smeagolo ne vidis. Ili estas batalemaj. Ili havas nigrajn okulojn kaj longajn nigrajn harojn, kaj orajn ringojn en la oreloj; jes, multe da bela oro. Kaj iuj havas sur la vangoj ruĝan farbon, kaj ruĝajn mantelojn; kaj iliaj standardoj estas ruĝaj, kaj la pintoj de iliaj lancoj; kaj ili havas rondajn ŝildojn, flavajn kaj nigrajn kun grandaj pikiloj. Ne afablaj, tre kruelaj misfaraj homoj ili aspektas. Preskaŭ same malbonaj kiel orkoj, kaj multe pli grandaj. Smeagolo opinias, ke ili venas el la sudo depost la fino de la Granda Rivero: ili alvenis laŭ la suda vojo. Ili preterpasis al la Nigra Pordego, sed eble sekvos aliaj. Ĉiam pli da personoj venas al Mordoro. Iun tagon tie enestos ĉiuj popoloj.

— ĉu estis olifontoj? — demandis Sam, forgesante sian timon pro sia avido ricevi novaĵojn el fremdaj lokoj.

— Ne, neniuj olifontoj. Kio estas olifontoj? — demandis Golumo. Sam stariĝis, metis la manojn malantaŭ la dorson (tion li ĉiam faris "deklamante poezion"), kaj komencis:

Muse grizforma,
dome enorma,
nazo serpenta,
teron skuanta,
dum kampojn mi plandas;
arbojn ĝi fendas.
Kun kornoj en buŝo
en sudo la puŝo,
ventumas orelegoj.
Dum multaj jardekoj
vagade mi muĝas,
neniam mi kuŝas,
eĉ ne la mortonto.
Jen mi, Olifonto,
el ĉiuj plej granda,
maljuna, altranda.
Se vidi sukcesus,
vi min ne forgesus.
Se vi min ne vidos,
pri mi vi mokridos;
Olifonto jen mi jam,
mensogas neniam.

— Tio, — diris Sam, fininte la deklamon, — tio estas rimaĵo, kiun ni

havas en la Provinco. Sensencaĵo, eble, kaj eble ne. Sed ni havas ankaŭ niajn historiojn kaj novaĵojn el la sudo, vi scias. En la malnova tempo hobitoj kutimis de tempo al tempo vojaĝi. Tio ne signifas, ke multaj iam revenis, aŭ ke ĉion, kion ili diris, oni kredis: “novaĵoj el Brio” kaj ne “certa kiel Provincaj informoj”, laŭ la sentencoj. Sed mi aŭdis rakontojn pri la granduloj fore en la sunaj landoj. Svertingoj, ni nomas ilin en niaj rakontoj; kaj ili rajdas sur olifontoj, laŭdire, kiam ili batalas. Ili surdorsigas al la olifontoj domojn kaj turojn, ĉu ne, kaj la olifontoj ĵetas rokojn kaj arbojn unu kontraŭ alian. Do kiam vi diris “viroj el la sudo, tute en ruĝo kaj oro”, mi diris “Ĉu estis olifontoj?” Ĉar se jes, mi intencus ŝtele rigardi, kun aŭ sen la risko. Sed jam mi supozas, ke neniam mi vidos olifonton. Eble tiaj bestoj ne ekzistas. — Li ĝemspiris.

— Ne, neniuj olifontoj, — diris Golumo denove. — Smeagolo ne aŭdis pri ili. Li ne deziras vidi ilin. Li ne deziras, ke ili ekzistu. Smeagolo deziras foriri de ĉi tie kaj kaŝiĝi ie pli sekure. Smeagolo deziras, ke la mastro iru. Afabla mastro, ĉu li ne akompanu Smeagolon?

Frodo stariĝis. Li ridis meze de la zorgoj, kiam Sam ripetis la malnovan apudfajran rimaĵon pri olifonto, kaj tiu rido liberigis lin de hezitado.

— Mi ŝatus, ke ni havu mil olifontojn kun Gandalfo sur blanka olifonto ĉekape, — li diris. — Tiam ni trarompus vojon en tiun ĉi misan landon, eble. Sed tio mankas; temas nur pri niaj propraj lacaj kruroj, jen ĉio. Nu, Smeagolo, la tria turniĝo eble montriĝos la plej bona. Mi akompanos vin.

— Bona mastro, saĝa mastro, afabla mastro! — kriis Golumo ĝojigite, frapetante la genuojn de Frodo. — Bona mastro! Do ripozu nun, afablaj hobitoj, sub ombro de la ŝtonoj, proksime sub la ŝtonoj! Ripozu kaj restu kvietaj, ĝis la Flava Vizaĝo foriros. Tiam ni povos iri rapide. Molaj kaj rapidaj kiel ombroj ni devos esti!

4

Pri spicherboj kaj stufita kuniklo

Dum la malmultaj restantaj horoj de taglumo ili ripozis, movante sin en la ombron dum la suno moviĝis, ĝis fine la ombro de l' okcidenta rando de ilia valo longiĝis, kaj la valon tute plenigis mallumo. Tiam ili manĝis iomete, kaj trinkis ŝpareme. Golumo manĝis nenion, sed li kontente akceptis akvon.

— Jam baldaŭ estos pli, — li diris, lekante siajn lipojn. — Bona akvo subenfluas en rojoj al la Granda Rivero, agrabla akvo en la terenoj, al kiuj ni iras. Ankaŭ manĝaĵon Smeagolo akiros tie, eble. Li tre malsatas, jes, *golum'*! — Li metis siajn du platajn manegojn al la ŝrumpinta ventro, kaj pala verda lumo ekaperis en liaj okuloj.

Profundis la krepusko, kiam ili ekvojaĝis, rampante trans la okcidentan randon de l' valo kaj fadante fantomece en la malglatan terenon vojrande. La luno havis tri noktojn antaŭ la pleno, sed ĝi ne superiris la montojn ĝis preskaŭ noktomezo, kaj la frua nokto tre malhelis. Unu ruĝa lumo ardis alte en la Turegoj de l' Dentoj, sed krom tio neniu signo videblis aŭ aŭdeblis pri la sendorma vaĉado sur Moranono.

Tra multaj mejloj tiu ruĝa okulo ŝajnis rigardadi ilin fuĝantajn, stumblantajn tra dezerta ŝtonoza tereno. Ili ne riskis laŭiri la vojon, sed ili restigis ĝin maldekstre, sekvante ĝian linion laŭeble precize je iometa distanco. Fine, kiam la nokto malnoviĝis, kaj ili estis jam lacaj, ĉar ili permesis al si nur unu mallongan ripozon, tiu okulo reduktiĝis al fajra punkteto kaj poste malaperis: ili jam ĉirkaŭiris la malhelan nordan ŝultron de la suba montetaro kaj celis suden.

Kun la koroj strange malpezigitaj ili nun ripozis denove, sed ne longe. Ili ne iris sufiĉe rapide por kontentigi Golumon. Laŭ lia kalkulo temis pri preskaŭ tridek leŭgoj de Moranono ĝis la krucvojo super Osgiliado, kaj li esperis trairi tiun distancon per kvar noktoj. Do baldaŭ ili denove baraktis antaŭen, ĝis la aŭroro komencis disvastiĝi malrapide en la vasta griza soleco. Tiam ili jam marŝis preskaŭ ok leŭgojn, kaj la hobitoj ne povis pluiri, eĉ se tion ili riskemus.

La kreskanta lumo rivelis al ili terenon jam malpli dezertan kaj ruinigitan. La montoj daŭre baŭmis minace je la maldekstro, sed proksime ili povis vidi la sudan vojon, nun celantan for de la nigraj radikoj de la montetoj kaj deklivantan okcidenten. Trans la vojo estis deklivoj kovritaj de

sombraj arboj kvazaŭ malhelaj nuboj, sed ĉie ĉirkaŭe kuŝis malorda erikejo plena je kalunoj, genistoj, kornusoj kaj aliaj arbustoj, kiujn ili ne konis. Ili vidis ie-tie aretojn de altaj pinoj. La koroj de la hobitoj iomete rekuraĝiĝis malgraŭ la laceco: la aero estis freŝa kaj bonodora, kaj memorigis ilin pri la altejoj de la fora Norda Kvarono. Ŝajnis bone malŝarĝiĝi, promeni sur tereno nur kelkjare regita de la Malhela Mastro kaj ankoraŭ ne tute miniĝinta. Sed sian endanĝeriĝon ili ne forgesis, ankaŭ ne la Nigran Pordegon, kiu ankoraŭ tro proksimis, kvankam ĝi estis kaŝita malantaŭ la mornaj montetoj. Ili ĉirkaŭrigardis serĉante kaŝlokon, kie ili povus ŝirmi sin de fiaj okuloj dum la cetero de la lumo.

La tago pasis maltrankvile. Ili kuŝis profunde en la erikoj kaj kalkulis la lantajn horojn, dum kiuj malmulto ŝajnis ŝanĝiĝi; ĉar ili estis ankoraŭ sub la ombroj de Efelo Duad, kaj la suno estis vualita. Frodo kelkfoje dormis profunde kaj trankvile, ĉu fidante Golumon, ĉu tro elĉerpita por zorgi pri li; sed Sam trovis malfacile fari pli ol dormeti, eĉ kiam Golumo evidente dormadis snufetante kaj tikante pro siaj sekretaj sonĝoj. Eble malsato pli ol malfido tenis lin maldorma: li komencis sopiri bonan hejmecan manĝaĵon, “ion varman el la poto”.

Tuj kiam la tero paliĝis je senforma grizo sub venonta nokto ili rekomencis la vojaĝon. Sufiĉe baldaŭ Golumo kondukis ilin suben sur la sudan vojon; kaj post tio ili progresis pli rapide, kvankam la danĝero estis pli granda. Iliaj oreloj streĉe aŭskultis por aŭdi hufojn aŭ piedojn sur la vojo antaŭe aŭ sekvantajn malantaŭe; sed la nokto pasis, kaj ili aŭdis neniun sonon de marŝanto aŭ rajdanto.

La vojo estis konstruita en tempo longe pasinta, kaj tra eble tridek mejloj sub Moranono, ĝi estis nove riparita, sed ju pli ĝi iris suden, des pli la sovaĝejo trudiĝis al ĝi. La metieco de homoj antikvaj ankoraŭ videblis en ĝia rekta senŝancela direktiĝo kaj ebena celado: de tempo al tempo ĝi tratranĉis al si vojon tra montflankaj deklivoj, aŭ transsaltis rojon per larĝa belforma arkaĵo el longviva masonaĵo; sed finfine malaperis ĉiuj indikoj pri ŝtonlaboro, krom ie-tie rompiĝinta pilastro gvatanta el la vojflankaj arbustoj, aŭ malnovaj pavimŝtonoj ankoraŭ kaŝiĝantaj inter loloj kaj musko. Erikoj, arboj kaj filikoj malordis suben kaj pendis super la flankoj aŭ etendiĝis dise super la vojo. Ĝi reduktiĝis finfine al kampara ĉarvojeto malmulte uzita; sed ĝi ne serpentumis: ĝi daŭrigis sian propran certan direktiĝon kaj gvidis ilin laŭ la vojo plej rapida.

Do ili pasis en la nordan parton de tiu tereno, kiun la homoj iam nomis Itilio, bela regiono de grimpaj arbaroj kaj rapide subenfluantaj riveretoj. La nokto iĝis favora sub steloj kaj ronda luno, kaj al la hobitoj ŝajnis, ke la bonodoro de la aero plifortiĝas, dum ili antaŭeniras; kaj laŭ la blovado kaj

murmurado de Golumo ŝajnis, ke ankaŭ li rimarkis tion kaj ne ŝatis ĝin. Je l' unuaj indikoj pri la tagiĝo ili denove haltis. Ili alvenis la finon de longa valo, profunda kaj en la mezo krutflanka, per kiu la vojo trafendis la ŝtonan firston. Tie ili grimpis la okcidentan randaĵon kaj ĉirkaŭrigardis.

La tago komenciĝis sur la ĉielo, kaj ili vidis, ke la montoj estas jam multe pli malproksimaj, forirantaj orienten laŭ longa kurbiĝo kiu perdiĝis en la foro. Kiam ili turniĝis okcidenten, antaŭ ili malabruptaj deklivoj subeniĝis en malklarajn nebuletojn tre sube. Ĉie ĉirkaŭ ili estis malgrandaj boskoj da rezinaj arboj, abioj, cedroj, cipresoj kaj aliaj specoj nekonataj en la Provinco, inter kiuj estis larĝaj maldensejoj; kaj ĉie estis abundo da dolĉodoraj spicherboj kaj arbustoj. La longa vojaĝo el Rivendelo kondukis ilin tre suden de ilia propra lando, sed ĝis nun en tiu pli ŝirmata regiono la hobitoj ne sentis la klimatan ŝanĝiĝon. Ĉi tie la printempo jam estis ĉirkaŭ ili; frondoj trapikis muskon kaj humon, larikoj estis verdfingraj, etaj floroj malfermiĝis sur la herbo, birdoj kantadis. Itilio, la ĝardeno de Gondoro, jam ruiniĝinta, daŭre retenis malordan driadan belecon.

Sude kaj okcidente ĝi alrigardis la varmajn subajn valetojn de Anduino, ŝirmatajn oriente de Efelo Duad kaj tamen ne sub la montombro, protektatajn norde de Emin Muilo, malfermitajn al la sudaj blovetoj kaj la humidaj ventoj de la fora Maro. Kreskis tie multaj arboj, antaŭlonge plantitaj, falantaj en nevartitan maljunaĝon inter konfuziĝo da senzorgaj posteuloj; kaj boskoj kaj densejoj estis el tamariko kaj fortodoraj terebintarboj, el olivarboj kaj el laŭroj; kaj troviĝis juniperoj kaj mirtoj kaj timianoj kreskantaj arbuste, aŭ per siaj lignecaj rampaj tigoj mantelis en profundaj tapetoj la kaŝitajn ŝtonojn; salvioj diversspecaj elmetis florojn bluajn, ruĝajn aŭ pale verdajn; kaj majoranoj kaj novŝosantaj petroseloj, kaj multaj plantaĵoj, kies formoj kaj odoroj ne troviĝis en la ĝardenklero de Sam. La grotetoj kaj rokmuroj estis jam stelumitaj de saksifragoj kaj sedoj. Primoloj kaj anemonoj maldormis en la avelegejoj; kaj asfodeloj kaj multaj lilifloroj pendolis siajn duonapertajn kapojn en la herbo: profunda verda herbo apud la lagetoj, kie haltis falintaj fluoj en friskaj kavoj dum la vojaĝo suben al Anduino.

La vojaĝantoj turnis la dorsojn al la vojo kaj iris suben laŭ la deklivo. Dum ili marŝis, puŝante sin tra arbustoj kaj herbejoj, leviĝis ĉirkaŭ ili dolĉaj bonodoroj. Golumo tusis kaj duonvomis; sed la hobitoj profunde enspiris, kaj subite Sam ekridis pro kora malŝarĝiĝo, ne pro ŝercemo. Ili laŭiris rojon, kiu rapide subeniris antaŭ ili. Baldaŭ ĝi gvidis ilin al eta klara lago en malprofunda valeto: ĝi kuŝis en la rompitaj ruinaĵoj de antikva ŝtonbaseno, kies ĉizitan randon preskaŭ tute kovris muskoj kaj rozarbedoj; ĉirkaŭ ĝi staris iridfolioj en vicoj, kaj folioj nimfeaj flosis sur ĝia milde ondeta

supraĵo; sed ĝi estis profunda kaj freŝa, kaj daŭre elverŝiĝis sensone laŭ ŝtona beko ĉe la fora ekstremo.

Tie ili sin lavis kaj trinkis ĝissate ĉe la enflua trueto. Poste ili serĉis ripozejon, ankaŭ sinkaŝejon; ĉar tiu tereno, ankoraŭ belaspekta, tamen estis nun teritorio de la Malamiko. Ili ne tre malproksimis de la vojo, tamen eĉ en tia mallonga spaco ili vidis cikatrojn de malnovaj militoj kaj pli novajn vundojn kaŭzitajn de la orkoj kaj aliaj fiaj servistoj de la Malhela Mastro: ŝakto de nekovritaj rubo kaj malpuraĵo; arboj malzorge dehakitaj kaj postlasitaj al morto, kun misaj runoj aŭ la fidestina signo de l' Okulo eltranĉitaj per krudaj strioj sur iliaj ŝeloj.

Sam skrablanta sub la elirejo de la lago, flarante kaj tuŝante la nekonatajn plantaĵojn kaj arbojn, momente forgesinte pri Mordoro, ricevis memorigon pri ĝia ĉiam ĉeesta danĝero. Li hazarde trovis cirklon ankoraŭ brulmakulitan, kaj meze de ĝi li trovis amason da karbumitaj frakasitaj ostoj kaj kranioj. La rapida kreskivo de la sovaĝejo je rozarbedoj kaj eglanterioj kaj pendantaj klematidoj jam tiris vualon sur tiun lokon de terura festado kaj mortigado; sed ĝi ne estis antikva. Li retrorigardis al siaj kunuloj, sed li diris nenion: la ostojn prefere lasu en trankvilo kaj nepalpumitaj kaj dispelitaj de Golumo.

— Ni trovu lokon por tratagi, — li diris. — Ne pli sube. Pli alte, laŭ mi.

Iom retro super la lago ili trovis profundan brunan kampeton da pasintjaraj filikoj. Malantaŭ ĝi estis densejo da malhelfoliaj laŭroj kreskantaj supren laŭ kruta teramaso kronita de maljunaj cedroj. Ili decidis resti tie kaj pasigi la tagon, kiu jam aŭguris helon kaj varmon. Tago taŭga por promenado survoje tra la boskoj kaj valetoj de Itilio; sed kvankam orkoj distancigas sin de sunlumo, tamen tie troviĝis tro multaj lokoj, kie ili povus kaŝiĝi kaj vaĉi; kaj aliaj fiokuloj viglis tie: Saŭrono havis multajn servistojn. Golumo ĉiuokaze rifuzis moviĝi sub la Flava Vizaĝo. Baldaŭ tiu rigardos super la malhelaj firstoj de Efelo Duad, kaj li svenetos kaj kaŭros pro la lumo kaj varmego.

Sam dum la marŝado serioze pripensis nutraĵon. Ĉar la malespero de l' netrairebla Pordego estis malantaŭe, li ne sentis tian emon kian la mastro malatenti la vivrimedojn post la misiofino; kaj ĉiuokaze ŝajnis al li pli saĝe ŝpari la vojpanon de la elfoj ĝis malpli favora estonteco. Jam pasis ses tagoj aŭ pli, de kiam li kalkulis, ke ili havas stokon sufiĉan por nuraj tri semajnoj.

"Se ni atingos la fajron dum tioma tempo, estos bonŝance laŭ la nuna progreso! — li pensis. — Kaj ni eble volos reiri. Ni eble!"

Cetere, fine de longa noktmarŝado, kaj post baniĝo kaj trinkado, li estis eĉ pli ol kutime malsata. Vespermanĝon, aŭ matenmanĝon, en la malnova kuirejo ĉe Bagŝuta Vico, ĝuste tion li vere sopiris. La ideo trafis lin, kaj li

sin turnis al Golumo. Golumo estis ŝtele ekrampanta kvarpiede tra la filikoj.

— Hej! Golumo! — diris Sam. — Kien vi iras? ĉu por ĉasi? Nu, vidu, olda nazulo, al vi ne plaĉas nia manĝaĵo, kaj mi mem ne domaĝus variecon. Via nova devizo estas *ĉiam helpopreta*. Ĉu vi povas trovi ion taŭgan al malsata hobito?

— Jes, eble, jes, — diris Golumo. — Smeagolo ĉiam helpas, se oni petas — se oni petas afable.

— Bone! — diris Sam. — Do mi petas. Kaj se tio ne sufiĉe afablas, mi petegas.

Golumo malaperis. Li forestis iom longete, kaj Frodo post kelkaj mordoj da *lembaso* sin aranĝis profunde en la brana filikaro kaj endormiĝis. Sam rigardis lin. La frua taglumo ĵus subenrampis en la subarbajn ombrojn, sed li vidis tre klare la vizaĝon de l' mastro kaj ties manojn, kuŝantajn ripoze sur la tero apude. Li subite rememoris Frodon, kiam tiu kuŝis dormanta en la domo de Elrondo post lia terura vundiĝo. Tiam dumgarde Sam rimarkis, ke kelkfoje lumo ŝajnas malforte brili interne; sed nun la lumo estis eĉ pli evidenta kaj forta. La vizaĝo de Frodo estis trankvila, la signoj de timo kaj zorgado forlasis ĝin; sed ĝi aspektis maljuna, maljuna kaj bela, kvazaŭ ĉizado de jaroj formigaj estus nun rivelita per multaj fajnaj linioj antaŭe kaŝitaj, kvankam la identeco de la vizaĝo ne ŝanĝiĝis. Tio ne signifas, ke ĝuste tiel Sam Vato formulis sian penson. Li skuis sian kapon, kvazaŭ trovante vortojn senutilaj, kaj murmuris:

— Mi amas lin. Tia li estas, kaj kelkfoje ĝi trabrilas iel. Sed mi amas lin, ĉu aŭ ne.

Golumo revenis kviete kaj transrigardis la ŝultron de Sam. Rigardinte Frodon, li fermis siajn okulojn kaj forrampis sensone. Sam alvenis lin post momento kaj trovis lin manĝanta ion kaj murmuranta al si. Apud li sur la tero kuŝis du malgrandaj kunikloj, kiujn li komencis avide okulumi.

— Smeagolo ĉiam helpas, — li diris. — Li alportis kuniklojn, agrablajn kuniklojn. Sed la mastro endormiĝis, kaj eble Sam volas endormiĝi. Jam ne volas kuniklojn. Smeagolo klopodas helpi, sed li ne povas ion kapti dumminute.

Sam tamen tute ne malŝatis kuniklaĵon, kaj tion diris. Almenaŭ ne kuniklaĵon kuiritan. Ĉiuj hobitoj, kompreneble, scias kuiri, ĉar ili eklernas tiun arton antaŭ la abocon (kiun multaj neniam atingas); sed Sam estis kuiranto tre kapabla, eĉ laŭ takso de hobitoj, kaj li faris multon el la bivaka kuirado dum la vojaĝoj, kiam prezentiĝis okazo. Li kunportis espereme kelkajn ilojn en sia tornistro: etan tindrujon, du malprofundajn kaseroletojn, el kiuj la malpli granda adaptiĝis en la pli granda; ene de ili estis metitaj ligna kulero, mallonga dupikila forko kaj kelkaj pikstangetoj; kaj kaŝita

funde de la tornistro en plata ligna skatolo valoraĵo malkreskanta: iom da salo. Sed li bezonis fajron, kaj krome kelkajn aliajn aferojn. Li pripensis iomete, dum li eligis sian tranĉilon, purigis kaj akrigis ĝin, kaj komencis prepari la kuniklojn. Li ne intencis eĉ pormomente lasi dormantan Frodon sola.

— Ek, Golumo, — li diris. — Mi havas por vi ankoraŭ alian taskon. Iru plenigi ĉi tiujn kaserolojn per akvo kaj reportu ilin!

— Smeagolo alportos akvon, jes, — diris Golumo. — Sed kial la hobito deziras tiom da akvo? Li jam trinkis, li sin lavis.

— Ne zorgu pri tio, — diris Sam. — Se vi ne povas diveni, vi sufiĉe baldaŭ konstatos. Kaj ju pli baldaŭ vi alportos la akvon, des pli baldaŭ vi konstatos. Ne difektu iun mian kaserolon, aŭ mi faros el vi haketaĵon.

Dum Golumo forestis, Sam rigardis denove Frodon. Tiu plu dormis kviete, sed Sam nun estis plej trafata de la magreco de liaj vizaĝo kaj manoj.

— Tro maldika kaj malloza li estas, — li murmuris. — Ne taŭge por hobito. Se mi sukcesos kuiri ĉi kunikletojn, mi vere vekos lin.

Sam kunrastis amaseton da filikoj plej sekaj, kaj poste skrablis supren sur la dekliveto kolektante aron da branĉetoj kaj lignaj rompitaĵoj; falinta branĉo de cedro ĉe la supro havigis al li bonan stokon. Li eltranĉis kelkajn herbkvadratojn sube de l' dekliveto tuj ekster la filikejo, kaj faris malgrandan truon kaj metis tien la brulaĵon. Estante lerta pri siliko kaj tindro, li baldaŭ ĉendis fajreton. Ĝi kreis preskaŭ neniom da fumo sed dissendis aroman odoron. Li ĝuste kliniĝis super sia fajro, ŝirmante ĝin kaj aldonante lignon pli pezan, kiam Golumo revenis, zorge portante la kaserolojn kaj grumblante al si.

Li demetis la kaserolojn kaj subite ekvidis, kion faras Sam. Li eligis malfortan siblan kriĉon kaj ŝajnis samtempe tima kaj kolera.

— Ah! Sss... Ne! Ne! Stultaj hobitoj, stultaj, jes stultaj! Ili ne faru tion!

— Ne faru kion? — demandis Sam surprizite.

— Ne faru la aĉajn ruĝajn langojn, — siblis Golumo. — Fajro, fajro! Estas danĝera, jes danĝera. Ĝi brulas, ĝi mortigas. Kaj ĝi alvokos malamikojn, jes certe.

— Mi opinias, ke ne, — diris Sam. — Neniu kialo por tio, se oni ne surmetos malsekaĵon kaj kreos subbrulaĵon. Sed se jes, do jes. Mi intencas riski tion, ĉiuokaze. Mi intencas stufi ĉi kunikletojn.

— Ĉu stufi la kunikletojn? — kvikis Golumo konsternite. — Fuŝi belan viandon, kiun Smeagolo restigis al vi, kompatinda malsata Smeagolo! Pro kio? Pro kio, stulta hobito? Ili estas junaj, ili estas molaj, ili estas agrablaj. Manĝu ilin, manĝu ilin! — Li ungis la pli proksiman kuniklon, jam senhaŭtigitan kaj kuŝantan apud la fajro.

— Trankviliĝu! — diris Sam. — ĉiu laŭ propra moro. Nia pano vomigas vin, kaj nekuirita kunikleto vomigas min. Se vi donis al mi kunikleton, tiu kunikleto estas mia, vidu, por kuiri, se tion mi emas. Kaj mi emas. Ne necesas, ke vi rigardu min. Iru kapti alian kaj manĝu laŭvole. Ie private kaj for de mia vidkampo. Tiam vi ne vidos la fajron, kaj mi ne vidos vin, kaj ni ambaŭ pli feliĉos. Mi certigos, ke la fajro ne fumu, se tio iel feliĉigos vin.

Golumo foriris grumblante kaj rampis en la filikejon. Sam okupiĝis pri siaj kaseroloj.

— Kion la hobito bezonas kun kunikleto, — li diris al si, — tio estas kelkaj spicherboj kaj radikaĵoj, precipe terpomoj, por ne paroli pri pano. Spicherbojn ni povas akiri, verŝajne.

— Golumo! — li vokis mallaŭte. — Tria fojo pagas la tuton. Mi deziras kelkajn spicherbojn. — La kapo de Golumo elrigardis el la filikejo, sed li aspektis nek helpema nek amikeca. — Kelkaj laŭraj folioj, iom da timiano kaj salvio sufiĉos, antaŭ la akvo ekbolos, — diris Sam.

— Ne! — diris Golumo. — Smeagolo ne estas kontenta. Kaj al Smeagolo ne plaĉas odoraĉaj folioj. Li ne manĝas herbojn aŭ radikojn, ne trezoro, ne ĝis li malsategas aŭ tre malsanas, kompatinda Smeagolo.

— Smeagolo trafos en vere varmegan akvon, kiam bolos tiu ĉi akvo, se li ne faros laŭpete, — graŭlis Sam. — Sam enmetos tien lian kapon, jes trezoro. Kaj mi devigus lin serĉi ankaŭ napojn kaj karotojn, kaj ankaŭ terpomojn, se temus pri la ĝusta sezono. Mi vetas, ke tie ĉi sovaĝe diskreskas ĉiaj bonaĵoj. Mi donus multon por manpleno da terpomoj.

— Smeagolo ne iros, ho ne trezoro, ne ĉi-foje, — siblis Golumo. — Li timas, kaj li tre lacas, kaj tiu ĉi hobito ne afablas, tute ne afablas. Smeagolo ne elfosos radikojn, karotojn kaj... terpomojn. Kio estas terpomoj, trezoro, he, kio estas terpomoj?

— Ter-po-moj, — diris Sam. — Frandaĵo de la Avulo, kaj elstare bona balasto por malplena stomako. Sed vi trovos neniom, do ne necesas serĉi. Sed estu bona Smeagolo kaj alportu al mi spicherbojn, kaj mi taksos vin pli alte. Krom tio, se vi komencos novan vivmanieron kaj daŭrigos ĝin, mi kuiros por vi kelkajn terpomojn iam. Mi kuiros ja: frititaj fiŝo kaj terpomfingroj pretigitaj de S. Vato. Tion vi ne povus rifuzi.

— Jes, jes, ni povus. Difekti agrablan fiŝon per brulumado. Donu al mi fiŝon *jam nun*, kaj tenu mem fiajn terpomfingrojn!

— Ho, vi estas senesperiga, — diris Sam. — Endormiĝu!

Fine li devis mem trovi la bezonataĵojn; sed ne necesis al li iri foren, ne el videblo de la loko, kie kuŝis lia mastro ankoraŭ dormanta. Dum kelka tempo Sam sidis meditante kaj prizorgante la fajron ĝis la akvo bolis. La taglumo plifortiĝis kaj la aero iĝis varma; la roso forvelkis desur herboj kaj

folioj. Baldaŭ la kunikloj distranĉitaj kuŝis boletante en siaj kaseroloj kun la faskigitaj spicherboj. Sam preskaŭ endormiĝis dum la tempopaso. Li lasis ilin stufiĝi dum preskaŭ unu horo, provante ilin de tempo al tempo per sia forko, kaj gustumante la buljonon.

Kiam li opiniis ĉion preta, li forigis la kaserolojn de la fajro kaj rampis ĝis Frodo. Frodo duonmalfermis siajn okulojn, kiam Sam superombris lin, kaj tiam li vekiĝis el sia sonĝado: alia nekaptebla sonĝo paca.

— Saluton, Sam, — li diris. — Ĉu ne ripozas? Ĉu io misas? Kioma horo estas?

— Ĉirkaŭ du horoj post la tagiĝo, — diris Sam, — kaj preskaŭ duono post la oka laŭ la Provincaj horloĝoj, eble. Sed nenio misas. Kvankam ĉion mi ne nomus senmakula: neniuj legomoj, neniuj cepoj, neniuj terpomoj. Mi havas por vi iom da stufaĵo kaj iom da supo, sinjoro Frodo. Bonfaros al vi. Vi devos elsuĉi ĝin el via tasego; aŭ rekte el la kaserolo, kiam ĝi estos pli malvarmeta. Mi ne kunportis bovlojn, nek ion konvenan.

Frodo oscedis kaj streĉis sin.

— Vi devis ripozi, Sam, — li diris. — Kaj ĉendo de fajro estas danĝera ĉi tie. Sed mi ja sentas malsaton. Hmmm! ĉu mi flaras ĝin de ĉi tie? Kion vi stufis?

— Donacon de Smeagolo, — diris Sam: — duon da kunikloj; kvankam mi opinias, ke Golumo jam domaĝas ilin. Sed nenio estas por akompani ilin krom kelkaj spicherboj.

Sam kaj lia mastro sidis interne de la filikejo kaj manĝis sian stufaĵon el la kaseroloj, dividante la malnovajn forkon kaj kuleron. Ili permesis al si po duonpecon da elfa vojpano. Tio ŝajnis festo.

— Fajf! Golumo! — Sam vokis kaj fajfis mallaŭte. — Venu! Dume tempo restas por intencoŝanĝo. Restas iom, se vi volas provi stufitan kuniklon. — Ne venis respondo. — Nu bone, supozeble li foriris por trovi ion por si. Ni finmanĝos ĝin.

— Kaj poste vi devos iom dormi, — diris Frodo.

— Ne ekdormu, dum mi dormos, sinjoro Frodo. Mi ne tre certas pri li. Ankoraŭ restas en li sufiĉe da Fetorulo — la fia Golumo, se vi min komprenas — kaj ĝi refortiĝas. Tamen mi opinias, ke unue li provus strangoli min. Ni ne interkonsentas, kaj li ne estas kontenta pri Sam, ho ne trezoro, tute ne kontenta.

Ili finmanĝis, kaj Sam foriris por lavi sian manĝilaron. Stariĝante por reiri, li retrorigardis laŭ la deklivo. Tiumomente li vidis la sunon leviĝi el la fumo, aŭ nebuleto, aŭ malhela ombro, aŭ kio ajn ĝi estis, kiu kuŝis ĉiam oriente, kaj ĝi etendis siajn radiojn orajn suben sur la arbojn kaj maldensejojn ĉirkaŭ li. Tiam li rimarkis maldensan spiralon de grizblua

fumo, klare videblan kiam ĝin trafis la sunlumo, leviĝanta el densejo supre. Ŝokite li konstatis, ke tio estas la fumo de lia eta kuirfajro, kiun li neglektis estingi.

— Tio ne taŭgas! Mi neniam supozis, ke ĝi tiel montriĝos! — li murmuris kaj komencis retrorapidi. Subite li haltis kaj aŭskultis. Ĉu li aŭdis fajfon aŭ ne? Aŭ ĉu tio estis pepo de iu stranga birdo? Se ĝi estis fajfo, ĝi ne aŭdiĝis el la direkto de Frodo. Jen ĝi denove el alia loko! Sam komencis kuri laŭeble rapide supren laŭ la deklivo.

Li trovis ke malgranda branĉeto, forbrulante ĝis sia ekstera ekstremo, ĉendis iom da filikoj rande de la fajro, kaj la ekbrulantaj filikoj ardigis la herbkvadratojn. Haste li plande estingis la restaĵon de la fajro, dispuŝis la cindrojn kaj surmetis la kvadratojn al la truo. Poste li rerampis al Frodo.

— Ĉu vi aŭdis fajfon kaj ion, kio sonis kiel respondo? — li demandis. — Antaŭ kelkaj minutoj. Mi esperas, ke tio estis nur birdo, sed ĝi ne sonis tute tia, sed pli kiel imitata birdopepo, ŝajnis al mi. Kaj bedaŭrinde mia fajreto fumis. Nu, se mi allogis problemojn, mi neniam pardonos min. Kaj eble ankaŭ ne havos eblecon!

— ĉit! — flustris Frodo. — Mi opinias, ke mi aŭdis voĉojn.

La du hobitoj rimenis siajn tornistrojn, surdorsigis ilin fuĝoprete, kaj poste rampis pli profunden en la filikejon. Tie ili kaŭris aŭskultante.

Ne dubeblis pri la voĉoj. Tiuj parolis mallaŭte kaj kaŝiĝeme, sed ili estis proksimaj kaj pliproksimiĝantaj. Tute subite unu el ili klare parolis tre apude.

— Jen! De ĉi tie venis la fumo! Ĝi estos tre apude. En la filikejo sendube. Ni havos ĝin kvazaŭ kuniklon en kaptilo. Tiam ni ekscios, kio ĝi estas.

— Jes, kaj kion ĝi scias! — diris la dua voĉo.

Tuj kvar viroj venis paŝante tra la filikoj de malsamaj direktoj. Ĉar fuĝo kaj kaŝiĝo jam ne estis eblaj, Frodo kaj Sam salte stariĝis, metante la dorson al la dorso kaj eligante siajn glavetojn.

Se ilin mirigis tio, kion ili vidis, iliaj kaptintoj estis eĉ pli mirigitaj. Kvar altaj viroj staris tie. Du havis en la manoj lancojn kun larĝaj helaj pintoj. Du havis pafarkegojn, preskaŭ same longajn kiel ili mem, kaj grandajn sagujojn da longaj verdplumaj sagoj. Ĉiuj havis ĉeflanke glavojn kaj estis vestitaj per diversaj verdoj kaj brunoj, kvazaŭ por marŝi pli nevidate en la maldensejoj de Itilio. Verdaj gantoj kovris iliajn manojn, kaj iliaj vizaĝoj estis kapuĉitaj kaj maskitaj verde, escepte de la okuloj, kiuj estis tre akravidaj kaj helaj. Tuj Frodo pensis pri Boromiro, ĉar tiuj viroj similis lin stature, sintene kaj laŭ la parolmaniero.

— Ni ne trovis tion, kion ni serĉis, — diris unu. — Sed kion ni ja

trovis?

— Ne orkojn, — diris alia, lasante la tenilon de la glavo, kiun li kaptis kiam ili vidis ekbrili Pikilon en la mano de Frodo.

— Ĉu elfojn? — diris la tria dubeme.

— Ne! Ne elfojn, — diris la kvara, la plej alta, kaj ŝajne la ĉefa inter ili. — Elfoj ne promenas nuntempe en Itilio. Kaj elfoj estas mirinde belaj, aŭ tiel oni diras.

— Kio signifas, ke ni ne estas belaj, mi komprenas, — diris Sam. — Koran dankon. Kaj kiam vi findiskutos, eble vi diros, kiuj *vi* estas, kaj kial vi ne volas permesi al la du lacaj vojaĝantoj ripozi.

La alta verdulo ridis senĝoje.

— Mi estas Faramiro, militestro de Gondoro, — li diris. — Sed en tiu ĉi lando ne estas vojaĝantoj: nur servistoj de la Malhela Turego aŭ de la Blanka.

— Sed ni estas neniuj el ambaŭ, — diris Frodo. — Ni estas vojaĝantoj, kion ajn volas diri militestro Faramiro.

— Do rapidu deklari vin kaj vian komision, — diris Faramiro. — Nin atendas taskoj, kaj ĉi tie ne estas loko por rebusado aŭ traktado. Ek! Kie estas la tria el via kunularo?

— Ĉu la tria?

— Jes, la kaŝiĝemulo, kiun ni vidis kun nazo en la lageto tie sube. Li aspektis malfavore. Spiona speco de orko, mi konjektas, aŭ ties servanto. Sed li evitis nin per iu vulpa truko.

— Mi ne scias, kie li estas, — diris Frodo. — Li estas nur hazarda kunulo renkontita survoje, kaj mi ne respondecas pri li. Se vi trovos lin, indulgu lin. Konduku lin aŭ sendu lin al ni. Li estas nur vagulaĉo, sed li troviĝas sub mia prizorgo dum iom da tempo. Sed koncerne nin, ni estas hobitoj el la Provinco, fore nord-okcidente, post multaj riveroj. Frodo, filo de Drogo, estas mia nomo, kaj kun mi estas Samsaĝo, filo de Hamfasto, honorinda hobito, kiu servas min. Ni venis tra longaj vojoj: el Rivendelo, aŭ Imladriso, kiel iuj nomas ĝin. — Tiam Faramiro ektikis kaj pliatentis. — Sep kunulojn ni havis. Unun ni perdis en Morio, la aliajn ni postlasis en Part Galeno super Raŭroso: du el miaj parencoj, ankaŭ estis tie gnomo, elfo kaj du homoj. Tiuj estis Aragorno kaj Boromiro, kiu diris ke li devenas de Minaso Tirit, urbo en la sudo.

— Boromiro! — ĉiuj kvar viroj ekkriis.

— Ĉu Boromiro, filo de Mastro Denetoro? — demandis Faramiro, kaj stranga severa esprimo aperis sur lia vizaĝo. — Vi akompanis lin? Tio estas grava novaĵo, se ĝi estas vera. Sciu, fremduletoj, ke Boromiro, filo de Denetoro, estis la Supera Gardisto de l' Blanka Turego, kaj nia

ĉefkomandanto: li dolorige mankas al ni. Kiuj vi estas do, kaj kiel vi rilatis al li? Rapidu, ĉar la suno supreniras!

— Ĉu al vi estas konataj la enigmaj vortoj, kiujn Boromiro kunportis al Rivendelo? — Frodo respondis.

Serĉu la Glavon Rompitan:
ĝi loĝas en Imladriso...

— Tiuj vortoj estas konataj efektive, — diris Faramiro konsternite. — Estas ioma atestaĵo pri via vereco, ke ankaŭ vi konas ilin.

— Aragorno, kiun ni nomis, estas la portanto de la Glavo Rompita, — diris Frodo. — Kaj ni estas la duonuloj, pri kiuj menciis la rimaĵo.

— Mi vidas tion, — diris Faramiro penseme. — Aŭ mi vidas, ke tiel povas esti. Kaj kio estas la Plago de Isilduro?

— Tio estas kaŝita, — respondis Frodo. — Sendube ĝi estos klarigita siatempe.

— Ni devas ekscii pli multe pri tio, — diris Faramiro, — kaj ekscii, kio kondukas tiom orienten sub la ombro de jena... — li fingromontris kaj diris neniun nomon. — Sed ne nun. Ni havas taskon. Vi estas en danĝero, kaj hodiaŭ vi ne irus longe laŭ kampoj aŭ vojoj. Estos proksimaj fortaj manbatoj antaŭ ol la tago plenmaturiĝos. Poste morto aŭ rapida fuĝo reen al Anduino. Mi lasos du por gardi vin, por via kaj mia bonfarto. Saĝulo ne fidas je hazarda renkonto survoje en tiu ĉi lando. Se mi revenos, mi plu interparolos kun vi.

— Adiaŭ! — diris Frodo, malalte riverencante. — Pensu, kion vi volas, sed mi estas amiko de ĉiuj malamikoj de Unu Malamiko. Ni povus akompani vin, se ni duonuloj povus esperi servi vin, virojn tiel bravajn kaj fortajn, kiaj vi ŝajnas, kaj se mia komisio permesus tion. La lumo prilumu viajn glavojn!

— La duonuloj estas ĝentilaj personoj, kio ajn alia ili estas, — diris Faramiro. — Adiaŭ!

La hobitoj sidiĝis denove, sed ili nenion diris unu al la alia pri siaj pensoj kaj duboj. Proksime, ĝuste sub la makuliga ombro de l' malhelaj laŭroj, du viroj restis garde. Ili demetis siajn maskojn de tempo al tempo por freŝigi sin, dum pliintensiĝis la taga varmo, kaj Frodo vidis, ke ili estas viroj bonaspektaj, palhaŭtaj, malhelharaj, kun grizaj okuloj kaj vizaĝoj tristaj kaj fieraj. Ili interparolis per mallaŭtaj voĉoj, uzante unue la Komunan Lingvon, sed laŭ la pasinteca maniero, kaj poste ŝanĝante al la propra lingvo. Mirigite Frodo aŭskultante rimarkis, ke ili parolas la elfan lingvon, aŭ lingvon malmulte diferencan; kaj li rigardis ilin kun miro, ĉar li komprenis, ke ili certe estas dunadanoj el la sudo, homoj de la nasklinio de la Mastroj de

Okcidentio.

Post iom da tempo li alparolis ilin; sed ili respondis malvolonte kaj singarde. Ili nomis sin Mablungo kaj Damrodo, soldatoj de Gondoro, kaj ili estis disiruloj el Itilio, ĉar ili estis posteuloj de popolo iam vivinta en Itilio, antaŭ ol tiu estis konkerita. El tiaj viroj Mastro Denetoro elektis siajn atakpatrolojn por sekrete transiri Anduinon (kiel kaj kie ili rifuzis diri) kaj incitadi la orkojn kaj aliajn malamikojn, kiuj disvagis inter Efelo Duad kaj la Rivero.

— Estas preskaŭ dek leŭgoj de ĉi tie ĝis la orienta bordo de Anduino, — diris Mablungo, — kaj malofte ni venas tiom malproksimen. Sed ĉi-vojaĝe ni havas novan komision: ni venas por embuski la virojn el Harado. Ili malbenatu!

— Jes, malbenatu la sudanoj! — diris Damrodo. — Laŭdire estis traktoj pratempe inter Gondoro kaj la reĝlandoj de l' haradanoj en la Fora Sudo, kvankam amikeco neniam estis. En tiu tempo niaj limoj troviĝis fore sude post la elfluejoj de Anduino, kaj Umbaro, la plej proksima el iliaj regnoj, rekonis nian superecon. Sed tio estis antaŭlongege. Dum multaj vivlongoj neniu iris tien-reen inter ni. Nur lastatempe ni informiĝis, ke la Malamiko estis inter ili, kaj ili transiris aŭ reiris al Li — ili ĉiam pretis al Lia volo — kion faris ankaŭ multaj en la oriento. Mi ne dubas, ke la tagoj de Gondoro estas nombritaj, kaj la muroj de Minaso Tirit estas kondamnitaj, tiom grandaj estas Liaj forto kaj malico.

— Tamen ni ne volas sidi senfare kaj permesi, ke Li faru ĉion laŭ Sia volo, — diris Mablungo. — Tiaj malbenindaj sudanoj nun almarŝas laŭ la pravojoj por plifortigi la armeojn de la Malhela Turego. Jes, ĝuste laŭ la vojoj, kiujn konstruis la metilerto de Gondoro. Kaj ili iras ĉiam pli malzorge, ni informiĝas, supozante la potencon de sia nova mastro sufiĉe forta, ke la nura ombro de Liaj montetoj protektos ilin. Ni venas por instrui al ili alian lecionon. Granda amaso el ili marŝanta norden estis raportita al ni antaŭ kelkaj tagoj. Unu el iliaj regimentoj laŭ nia kalkulo atendeble preterpasos iam antaŭ la tagmezo: sur la supra vojo, kie ĝi trapasas la fenditan vojon. La vojo eble pasas, sed ne pasos ili! Ne dum Faramiro estras. Li nun gvidas nin dum ĉiuj danĝeraj aventuroj. Sed lia vivo estas protektata, aŭ la sorto ŝirmas lin por iu alia celo.

Ilia parolado velkis al aŭskulta silento. Ĉio ŝajnis senmova kaj atenta. Sam, kaŭranta rande de la filikejo, elgvatis. Per siaj akraj hobitaj okuloj li vidis, ke multaj pliaj viroj ĉeestas. Li povis vidi ilin ŝtelirantaj laŭ la deklivoj, unuope aŭ en longaj spaliroj, ĉiam sekvante la ombron de bosko aŭ densejo, aŭ rampantaj, apenaŭ videblaj en sia bruna kaj verda vesto, tra herbo kaj filikejoj. Ĉiuj estis kapuĉitaj kaj maskitaj, kun gantoj sur la manoj,

kaj estis armitaj simile al Faramiro kaj ties kunuloj. Post nelonge ili ĉiuj jam pasis kaj malaperis. La suno supreniris ĝis ĝi proksimiĝis al la sudo. La ombroj kuntiriĝis.

“Mi scivolas, kie estas tiu damninda Golumo? — pensis Sam, rampante reen en la pli densan ombron. — Sufiĉe eblas, ke oni trapikos lin kiel orkon aŭ lin rostos la Flava Vizaĝo. Sed mi opinias, ke li zorgos pri si”. Li kuŝiĝis apud Frodo kaj komencis dormeti.

Li vekiĝis pensante, ke li aŭdis trumpetan klarionon. Li sidiĝis. Estis jam plena tagmezo. La gardantoj staris atentaj kaj streĉitaj en ombro de la arboj. Subite la trumpetoj sonoris pli laŭte kaj nemiskompreneble supre, trans la supraĵon de l’ deklivo. Al Sam ŝajnis, ke li aŭdas ankaŭ kriojn kaj sovaĝan bruadon, sed tiu sono estis mallaŭta, kvazaŭ ĝi venus el iu fora kaverno. Baldaŭ poste la bruo de luktado erupciis pli proksime, ĝuste super ilia kaŝejo. Li povis aŭdi klare la sonoran gratiĝon de ŝtalo sur ŝtalo, tintegon de glavo kontraŭ fera ĉapo, obtuzan baton de klingo kontraŭ ŝildo; homoj kriadis kaj kriĉadis, kaj unu klara voĉo vokis: “Gondoro! Gondoro!”

— Tio sonas kiel cent forĝistoj forĝantaj samtempe, — diris Sam al Frodo. — Nun ili tiom proksimas, kiom mi deziras.

Sed la bruego pliproksimiĝis.

— Ili venas! — kriis Damrodo. — Vidu! Iuj sudanoj elrompiĝis el la kaptilo kaj fuĝas de la vojo. Jen ili iras! Niaj viroj persekutas ilin, kaj Faramiro antaŭas.

Sam, deziregante vidi ankoraŭ pli, iris aliĝe al la gardantoj. Li grimpis iom sur unu el la plej grandaj laŭroj. Momente li ekvidis brunhaŭtajn virojn ruĝvestitajn subenkurantajn laŭ la deklivo iom fore, dum verdvestitaj batalantoj saltis post ilin, hakante ilin falige dum ili fuĝis. Sagoj densis en la aero. Tiam subite rekte trans la randon de ilia ŝirma rokmuro falis viro, suben krakegante tra la sveltaj arboj, preskaŭ sur ilin. Li estis haltigita en la filikejo for kelkajn futojn, vizaĝmalsupre, kun verdaj sagoplumoj fiksitaj sur lia kolo sub ora kolumo. Liaj skarlataj vestoj estis ĉifonaj, lia brustarmaĵo el imbrikitaj bronzaj plataĵoj estis fendita kaj hakita, liaj nigraj harplektoj ore pasamentitaj estis sangotrempitaj. Lia bruna mano plu kroĉis tenilon de rompita glavo.

La unuan fojon Sam vidis batalon inter homoj, kaj ĝi ne tre plaĉis al li. Li estis kontenta, ke li ne povis vidi la vizaĝon de l’ mortinto. Li scivolis, kiel nomiĝis tiu viro, kaj de kie li venis; kaj ĉu li fakte malicis kore, aŭ mensogoj kaj minacoj gvidis lin dum la longa marŝado de lia hejmo, kaj se li vere ne preferus resti hejme en paco — tiu pensekflagro rapide estis forpelita el lia menso. Ĉar ĝuste kiam Mablungo antaŭenpaŝis al la falinta korpo, aŭdiĝis nova bruo. Grandaj kriado kaj voĉado. Inter ĝi Sam aŭdis

akran blekadon aŭ trumpetadon. Kaj poste egan skuadon aŭ batadon, kvazaŭ grandaj virŝafoj piedfrapus la teron.

— Gardu! Gardu! — kriis Damrodo al sia kunulo. — La Valaroj flankenturnu ĝin! Mumako! Mumako!

Mirigite kaj terurite, daŭre ĝojigote, Sam vidis enorman figuron trafrakasi el la arboj kaj veni kuregante laŭ la deklivo. Granda kiel domo, multe pli granda ol domo ĝi aspektis al li, grizvestita moviĝanta monteto. Timo kaj miro, eble, pligrandigis ĝin en la vido de l' hobito, sed la mumako el Harado efektive estis granda besto, kaj ties similaĵoj ne plu iras en Mez-Tero: ĝiaj parencoj, kiuj ankoraŭ vivas nun, estas nur memoraĵoj pri ĝiaj mezuro kaj majesteco. Ĝi daŭre venis rekte al la rigardantoj kaj nur lastmomente turniĝis flanken, pasante je distanco de nur kelkaj paŝoj, skuante la teron sub la piedoj: arbosimilaj kruregoj, enormaj velsimilaj oreloj disetenditaj, longa rostro suprenturnita kvazaŭ serpentego ekpikonta, ruĝaj okuletoj koleraj. Ĝiaj suprenturnitaj kornsimilaj dentegoj estis orstrie omamitaj kaj gutis sangon. Ĝiaj garnaĵoj skarlataj kaj oraj ondadis ĉirkaŭ ĝi sovaĝe ĉifonaj. La ruinaĵo de io, kio ŝajnis vera militoturo, kuŝis sur ĝia ondanta dorso, frakasita dum la furioza trapaso de l' arbaro; kaj alte sur ĝia kolo plu senespere kroĉiĝis figureto de potenca batalanto, giganto inter la svertingoj.

Plu tondrokuris la bestego, albatiĝante blinde kolera tra lagetoj kaj densejoj. Sagoj saltis kaj krakis sendamaĝe sur la triobla haŭto de ĝiaj flankoj. Ambaŭpartiaj viroj fuĝis antaŭ ĝi, sed ĝi atingis multajn kaj premegis teren. Baldaŭ ĝi ne plu videblis, ankoraŭ fore trumpetante kaj piedbatante. Kio fariĝis al ĝi, tion Sam aŭdis neniam: ĉu ĝi eskapis por vagi kelkan tempon en la sovaĝejo ĝis pereo malproksime de la hejmo, aŭ ĝi estis kaptita en iu profunda ŝakto; ĉu ĝi plu kuregis ĝis ĝi plonĝis en la Grandan Riveron kaj estis englutita.

Sam spiris profunde.

— Olifonto! — li diris. — Do ekzistas olifontoj, kaj mi vidis olifonton. Kia vivo! Sed neniu hejme kredos min. Nu, se tio finiĝis, mi iom ekdormos.

— Dormu, dum vi povas, — diris Mablungo. — Sed la estro revenos, se li estas nevundita, kaj kiam li venos, ni foriros rapide. Oni persekutos nin tuj, kiam la novaĵoj pri nia faro atingos la Malamikon, kaj tio okazos baldaŭ.

— Iru kviete, kiam vi devos! — diris Sam. — Ne necesas perturbi mian dormon. Mi marŝis la tutan nokton.

— Al mi ŝajnas, ke la estro ne lasos vin ĉi tie, mastro Samsaĝo, — ridis Mablungo. — Sed vi vidos.

5

La fenestro al la Okcidento

Ŝajnis al Sam, ke li dormetis nur kelkajn minutojn, kiam li vekiĝis kaj konstatis, ke estas malfrue posttagmeze kaj Faramiro revenis. Lin akompanis multaj viroj; efektive ĉiuj travivintoj de la atako estis nun kuniĝintaj sur apuda deklivo, sume du aŭ tri centoj. Ili sidis en larĝa duoncirklo, inter kies brakoj Faramiro sidis sur la tero, dum Frodo staris antaŭ li. Tio aspektis strange simila al prijuĝo de kaptito.

Sam elŝteliĝis el la filikoj, sed neniu atentis lin, kaj li lokis sin ĉe ekstremo de la homvicoj, kie li povis vidi kaj aŭdi ĉion okazantan. Li rigardis kaj aŭskultis atente, preta kuri helpe al la mastro laŭbezone. Li povis vidi la vizaĝon de Faramiro, kiu nun estis senmaska: ĝi estis severa kaj komandeca, kaj akra sagaco postkuŝis lian penetran rigardon. Dubo estis en la grizaj okuloj, kiuj senŝancele rigardis Frodon.

Sam baldaŭ konstatis, ke la militestro ne estas kontenta pri la rakonto de Frodo pri si plurpunkte: kia estis lia rolo en la Kunularo ekirinta el Rivendelo; kial li disiĝis de Boromiro; kaj kien li aktuale iras. Precipe ofte li revenis al la Plago de Isilduro. Klare li komprenis, ke Frodo kaŝas de li ion tre gravan.

— Sed ĝuste pro alveno de duonulo devus vekiĝi la Plago de Isilduro, aŭ tiel oni devas interpreti la vortojn, — li insistis. — Se do vi estas la nomita duonulo, sendube vi alportis tiun aĵon, kio ajn ĝi estas, al la Konsilio, pri kiu vi parolas, kaj tie Boromiro vidis ĝin. Ĉu tion vi neas?

Frodo nenion respondis.

— Do! — daŭrigis Faramiro. — Mi do volas ekscii de vi pli pri tio, ĉar kio koncernas Boromiron, min koncernas. Orka sago mortigis Isilduron, laŭ la malnovaj rakontoj. Sed orkaj sagoj multnombras, kaj Boromiro de Gondoro ne taksus ekvidon de tia sago signo de misfortuno. Ĉu tiun aĵon vi gardis? Ĝi estas kaŝita, vi diras, sed ĉu ne tiel ĉar vi elektas kaŝi ĝin?

— Ne, ne ĉar mi elektas, — respondis Frodo. — Ĝi ne estas mia posedaĵo. Ĝi ne estas posedaĵo de iu ajn mortulo, ĉu grava, ĉu malgrava; kvankam se iu ajn rajtus pretendi ĝin, tiu estus Aragorno, filo de Aratorno, kiun mi nomis, la estro de nia Kunularo de Morio ĝis Raŭroso.

— Kial li, sed ne Boromiro, princo de tiu urbo, kiun fondis la filoj de Elendilo?

— Ĉar Aragorno estas posteulo laŭ rekta linio, de patro al patro, de

Elendilo, filo de Isilduro mem. Kaj tiu glavo, kiun li portas, estas la glavo de Elendilo.

Mira murmuro trakuris la tutan ringon de homoj. Iuj kriis voĉe:

— La glavo de Elendilo! La glavo de Elendilo venas al Minaso Tirit! Grava novaĵo!

Sed la vizaĝo de Faramiro ne ŝanĝis la esprimon.

— Povas esti, — li diris. — Sed tiel granda pretendo devas esti pruvita, kaj postulataj estos klaraj pruvoj, se tiu Aragorno iam venos al Minaso Tirit. Li ne estis alveninta, nek iu ajn el via Kunularo, kiam mi ekvojaĝis antaŭ ses tagoj.

— Boromiro estis kontenta pri tiu pretendo, — diris Frodo. — Efektive, se Boromiro ĉeestus, li respondus ĉiujn viajn demandojn. Kaj tial ke li estis ĉe Raŭroso antaŭ multaj tagoj kaj tiam intencis iri rekte al via urbo, se vi reiros, vi eble baldaŭ ricevos tie la respondojn. Mia rolo en la Kunularo estis konata al li, samkiel al ĉiuj aliaj, ĉar ĝi estis difinita al mi de Elrondo el Imladriso mem antaŭ la tuta Konsilio. Pro tiu komisio mi venis al tiu ĉi lando, sed mi ne rajtas malkaŝi ĝin al iu ajn ekster la Kunularo. Tamen tiuj, kiuj pretendas kontraŭstari la Malamikon, agus plej bone ne malhelpante ĝin.

La tono de Frodo estis fiera, kion ajn li sentis, kaj Sam aprobis ĝin; sed ĝi ne mildigis Faramiron.

— Do! — li diris. — Vi diras, ke mi pritraktu proprajn aferojn, kaj reiru al mia hejmo kaj lasu vin trankvila. Boromiro rakontos ĉion, kiam li venos. Kiam li venos, vi diras! Ĉu vi estis amiko de Boromiro?

Antaŭ Frodo klare aperis memoro pri la atako de Boromiro kontraŭ li, kaj momente li hezitis. La okuloj de Faramiro rigardantaj lin malmoliĝis.

— Boromiro estis kuraĝa ano de nia Kunularo, — diris Frodo fine. — Jes, mi estis lia amiko, miaflanke.

Faramiro amare ridetis:

— Sekve vi funebrus, eksciinte, ke Boromiro mortis?

— Mi certe funebrus, — diris Frodo. Poste, rimarkinte la esprimon de la okuloj de Faramiro, li stumblis. — Ĉu mortis? Ĉu vi diras, ke li fakte mortis, kaj ke vi sciis tion? Ĉu vi provis trompi min per vortoj, ludante pri mi? Aŭ ĉu vi nun provas trompi min per mensogo?

— Mi ne volus trompi eĉ orkon per mensogo, — diris Faramiro.

— Kiel do li mortis, kaj kiel vi scias pri tio? Ja vi diris, ke neniu el la Kunularo atingis la urbon antaŭ ol vi lasis ĝin.

— Rilate la manieron de lia morto, mi esperis, ke lia amiko-kunulo sciigos al mi, kiel tio okazis.

— Sed li estis viva kaj forta, kiam ni disiĝis. Kaj li daŭre vivas laŭ tio,

kion mi scias. Kvankam vere estas en la mondo multaj danĝeroj.

— Ja multaj, — diris Faramiro, — kaj perfido ne la malpleja.

Sam fariĝis ĉiam pli senpacienca kaj kolera pro tiu konversacio. Tiuj lastaj vortoj estis pli ol li kapablis toleri, kaj trarompiĝinte en la cirklon li alpaŝis la flankon de sia mastro.

— Pardonpete, sinjoro Frodo, sed tio ĉi jam sufiĉe longe daŭris. Li ne rajtas alparoli vin tiel. Post ĉio, kion vi travivis, tiom por la profito de tiu kaj ĉiuj jenaj grandaj viroj, kiom por iu ajn alia. Do vidu, militestro! — Li starigis sin solide antaŭ Faramiro, kun la manoj surkokse, kaj mieno kvazaŭ alparolante junan hobiton, kiu respondis impertinente, demandite pri vizitoj al la fruktoĝardeno. Aŭdiĝis iom da murmurado, sed ankaŭ rikanis kelkaj el la spektantoj: vidi ilian estron sidanta sur la tero inter kvar okuloj kun juna hobito diskrura kaj kolere kuspa, estis unika sperto. — Vidu do! Al kio vi celas? Ni atingu la celon antaŭ ol ĉiuj orkoj de Mordoro atakos nin! Se vi pensas, ke mia mastro murdis tiun Boromiron kaj poste forkuris, mankas al vi sagaco; sed diru tion, kaj finu la aferon! Kaj poste sciigu al ni, kion vi intencas fari pri tio. Sed estas domaĝe, ke personoj kiuj priparolas bataladon kontraŭ la Malamiko ne pretas lasi, ke aliaj kontribuu sian moneron senmalhelpe. Li estus ege kontenta, se Li povus vidi vin nun. Li supozus, ke Li akiris novan amikon.

— Paciencon! — diris Faramiro senkolere. — Ne parolu anstataŭ via mastro, kies saĝo pli grandas ol la via. Kaj mi bezonas neniun por instrui al mi pri nia danĝero. Malgraŭ tio, mi utiligas mallongan tempon por juĝi juste en afero malfacila. Se mi estus tiel hastema kiel vi, mi eble mortigus vin antaŭlonge, ĉar al mi estas ordonite mortigi ĉiujn, kiujn mi trovas en tiu ĉi lando sen permeso de la Mastro de Gondoro. Sed mi mortigas nek homon nek beston nenecese, kaj ne ĝoje eĉ kiam tio necesas. Mi ankaŭ ne parolas vane. Do estu konsolita. Sidu apud via mastro kaj silentu!

Sam peze sidiĝis rugvizaĝe. Faramiro ree turnis sin al Frodo.

— Vi demandis, kiel mi scias, ke la filo de Denetoro estas mortinta. Mortosciigoj havas multajn flugilojn. *Nokto ofte portas novaĵojn al proksimaj parencoj*, oni diras. Boromiro estis mia frato. — Ombro de tristo trapasis lian vizaĝon. — Ĉu vi memoras ion pri speciala marko, kiun princo Boromiro kunportis inter siaj havaĵoj?

Frodo pensis momente, timante plian trukon, kaj scivolante kiel finiĝos tiu ĉi debato. Apenaŭ li savis la Ringon el la fiera kroĉo de Boromiro, kaj li ne sciis, kiel li nun fartos inter tiom da militpretaj kaj fortaj viroj. Tamen li sentis en sia koro, ke Faramiro, kvankam aspekte li multe similis sian fraton, estis viro malpli sinrigarda, tiel pli severa kiel pli saĝa.

— Mi memoras, ke Boromiro portis kornon, — li diris finfine.

— Vi memoras bone, kaj kiel iu kiu vere vidis lin, — diris Faramiro. — Do eble vi povas vidi ĝin mense: granda korno de granda uro de l' oriento, damaskenita je arĝento kaj surskribita per antikvaj literoj. Tiun kornon portis dum multaj generacioj la plejaĝa filo de nia domo; kaj oni diras, ke se ĝi estos blovata en okazo de neceso ie ajn inter la pratempaj limoj de Gondoro, ĝia voĉo ne estos ignorata.

» Kvin tagojn antaŭ ol mi ekiris ĉi-aventure, mi aŭdis blovadon de tiu korno: el la nordo, ŝajne, sed mallaŭte, kvazaŭ ĝi estus nur eĥo en la menso. Antaŭsciigo pri misfarto mi supozis ĝin, mia patro kaj mi, ĉar neniun sciigon ni aŭdis pri Boromiro post lia foriro, kaj neniu gardanto de niaj limoj vidis lin pasi. Kaj je la tria posta nokto alia kaj pli stranga afero okazis al mi.

» Mi sidis nokte apud Anduino en la griza mallumo sub la juna pala luno, rigardante la ĉiam-moviĝantan fluon; kaj la malgajaj kanoj susuris. Tiel ni ĉiam vaĉas la bordojn proksime al Osgiliado, kiun niaj malamikoj nun parte okupas kaj eliras el ĝi por ataki niajn terenojn. Sed tiunokte dormis la tuta mondo je la noktmeza horo. Tiam mi vidis, aŭ ŝajnis ke mi vidas, boaton flosantan sur la akvo, trembrile grizan, malgrandan boaton fremdforman kun alta pruo, kaj neniu enestis por remi aŭ stiri ĝin.

» Imponiĝo inundis min, ĉar ĉirkaŭis ĝin pala lumo. Sed mi leviĝis kaj iris al la riverbordo, kaj komencis elpaŝi en la fluon, ĉar mi estis logita al ĝi. Tiam la boato turniĝis al mi kaj ĉesigis sian iradon, kaj preterflosis malrapide en atingo de mia mano, tamen mi ne aŭdacis tuŝi ĝin. Ĝi iris profunde, kvazaŭ ĝi estus peze ŝarĝita, kaj ŝajnis al mi, kiam ĝi pasis sub mia rigardo, ke ĝi estis preskaŭ plenigita de klara akvo, de kiu venis la lumo, kaj en la akvo kuŝis dormanta batalinto.

» Rompita glavo estis sur lia genuo. Mi vidis sur li multajn vundojn. Tiu estis Boromiro, mia frato, mortinta. Mi rekonis lian armaĵon, lian glavon, lian amatan vizaĝon. Nur unu aĵo mankis: lia korno. Nur unu aĵon mi ne konis: belan zonon, kvazaŭ el interplektitaj oraj folioj ĉirkaŭ lia talio. *Boromiro*! — mi kriis. — *Kie estas via korno? Kien vi iras? Ho Boromiro*! Sed li estis jam for. La boato turniĝis en la fluon kaj pasis trembrile en la nokton. Sonĝeca tio estis, kaj tamen ne sonĝo, ĉar ne okazis vekiĝo. Kaj mi ne dubas, ke li estas mortinta kaj forpasis laŭ la Rivero al la Maro.

— Ve! — diris Frodo. — Tiu ja estis Boromiro, kia mi konis lin. Ĉar la oran zonon al li donis en Lotlorieno la Damo Galadriela. Estis ĝuste ŝi, kiu vestis nin tiel, kiel vi vidas nin, en elfa grizo. Tiu ĉi broĉo estas de la sama metilerto. — Li tuŝis la verdan-arĝentan folion, kiu bukis lian mantelon sub lia gorĝo.

Faramiro rigardis ĝin atente.

— Ĝi estas bela, — li diris. — Jes, ĝi estas verko sammetia. Sekve vi trapasis la landon Lorieno? Laŭrelindorinano ĝi nomiĝis pratempe, sed jam delonge ĝi kuŝas ekster la kono de la homoj, — li aldonis mallaŭte, taksante Frodon kun nova miro en la okuloj. — Multon, kio estis stranga pri vi, mi jam komencis kompreni. Ĉu vi ne rakontu al mi pli? Ĉar amare estas pensi, ke mortis Boromiro en vidodistanco de sia hejmlando.

— Mi ne povas diri pli ol mi jam diris, — respondis Frodo. — Tamen via historio plenigas min je misaŭguroj. Vizio estis tio, kion vi vidis, mi opinias, kaj nenio plia, iu ombro de misfortuno okazinta aŭ okazonta. Krom se ĝi estas vere iu mensoga truko de la Malamiko. Mi vidis vizaĝojn de belaj pratempaj batalintoj en dormo sub la lagetoj de la Mortaj Marĉoj, aŭ ŝajne tiaj pro liaj fiaj artoj.

— Ne, ne estis tiel, — diris Faramiro. — Ĉar liaj faroj plenigas la koron je abomeno, sed mian koron plenigis funebro kaj kompato.

— Tamen kiel povus okazi en vero tio? — demandis Frodo. — Ĉar neniu boato estus portebla trans la ŝtonajn montojn el Tol Brandiro; kaj Boromiro intends hejmeniri trans Entvaŝo kaj la kampoj de Rohano. Kaj tamen kiel povus ajna boato surrajdi la ŝaŭmon de la akvofalegoj kaj ne vrakiĝi en la bolantaj lagetoj, kvankam ŝarĝita de akvo?

— Mi ne scias, — diris Faramiro. — Sed de kie venis la boato?

— De Lorieno, — diris Frodo. — En tri tiaj boatoj ni remis laŭ Anduino ĝis la akvofaloj. Ankaŭ ili estis elfa laboraĵo.

— Vi trapasis la Kaŝitan Landon, — diris Faramiro, — sed ŝajnas, ke vi malmulte komprenis ties potencon. Se homoj intertraktas kun la Mastrino de Magio kiu loĝas en la Ora Arbaro, tiam ili atendu strangajn aferojn. Ĉar estas danĝere por mortema homo formarŝi el la mondo de tiu ĉi suno, kaj malmultaj pratempe venis el tie neŝanĝite, oni diras.

— *Boromiro, ho Boromiro*! — li kriis. — *Kion ŝi diris al vi, la Damo kiu ne mortas? Kion ŝi vidis? Kio vekiĝis en via koro tiam? Kial vi entute iris al Laŭrelindorinano, kaj ne venis laŭ propra vojo, sur la ĉevaloj de Rohano rajdante hejmen en la mateno*?

Poste sin returninte al Frodo, li parolis denove per la kvieta voĉo:

— Mi konjektas, ke vi povus iel respondi al tiuj demandoj, Frodo, filo de Drogo. Sed ne ĉi tie kaj ne nun, eble. Sed por ke vi ne plu taksu vizio mian rakonton, mi sciigu al vi tion ĉi. Almenaŭ la korno de Boromiro revenis reale, kaj ne nur ŝajne. La korno venis, sed ĝi estis fendita en du partoj, kvazaŭ per hakilo aŭ glavo. La partoj unuope albordiĝis: unu estis trovita inter la kanoj, kie kuŝis gardistoj el Gondoro, norde sub la enfluo de Entvaŝo; la alian trovis girantan sur la fluo iu, kiu havis komision surakvan. Strangaj hazardoj, sed murdo sin anoncas, kiel oni diras. Kaj nun la korno

de l’ pliaĝa filo kuŝas duere sur la sino de Denetoro, kiu sidas sur sia alta seĝo, atendante informojn. Kaj vi povas nenion sciigi al mi pri la fendo de la korno, ĉu?

— Ne, mi ne scias pri tio, — diris Frodo. — Sed tiu tago, kiam vi aŭdis ĝian blovadon, se via kalkulo pravas, estis la tago, en kiu ni disiĝis, kiam mi kaj mia servisto forlasis la Kunularon. Kaj nun via rakonto plenigas min je antaŭtimo. Ĉar se Boromiro estis tiam en danĝero kaj estis mortigita, mi nepre devas timi, ke pereis ankaŭ miaj kunuloj. Kaj tiuj estis miaj parencoj kaj miaj amikoj. Ĉu vi ne volas flankenmeti vian dubon pri mi kaj permesi, ke mi foriru? Mi estas laca, dolorplena kaj timanta. Sed mi havas taskon farendan aŭ provendan, antaŭ ol ankaŭ mi estos mortigita. Kaj tiom pli necesas hasto, se ni, du duonuloj, estas la sola restaĵo de nia Kunularo. Reiru, Faramiro, brava militestro de Gondoro, kaj defendu vian urbon, dum vi povas, kaj lasu min iri tien, kien min kondukas mia sorto.

— Por mi estas neniom da konsolo en nia interparolo, — diris Faramiro, — sed vi verŝajne ĉerpas el ĝi pli da timo ol necese. Krom se la popolanoj de Lorieno venis al li, kiu vestis Boromiron konvene al funebraĵo? Ne orkoj aŭ servistoj de la Sennoma. Iuj el via Kunularo, mi konjektas, plu vivas. Sed kio ajn okazis ĉe la Norda Limo, mi ne plu pridubas vin, Frodo. Se malfacilaj spertoj ebligas al mi prijuĝi la vortojn kaj vizaĝojn de la homoj, mi do rajtas konjekti pri duonuloj! Kvankam, — li ridetis, — estas io stranga pri vi, Frodo, ia elfeca sinteno eble. Sed dependas pli de niaj interparoloj, ol mi unue supozis. Mi devus nun rekonduki vin al Minaso Tirit por tie pravigi vin ĉe Denetoro, kaj mia vivo juste estos en risko, se mi nun elektos agmanieron, kiu montriĝos misa por mia urbo. Do mi ne decidos rapide, kion fari. Tamen ni devos ekiri de ĉi tie sen plia prokrasto.

Li salte stariĝis kaj donis kelkajn ordonojn. Tuj la viroj ĉirkaŭantaj diseriĝis en malgrandajn grupojn kaj foriris laŭ tiu aŭ alia vojo, malaperante rapide en la ombrojn de la rokoj kaj arboj. Baldaŭ nur Mablungo kaj Damrodo restis.

— Nun vi, Frodo kaj Samsaĝo, akompanos min kaj miajn gardistojn, — diris Faramiro. — Vi ne povas iri laŭ la vojo suden, se tion vi intencis. Ĝi estos malsekura dum pluraj tagoj, kaj ĉiam pli atente vaĉata post tiu interbatiĝo ol ĝi estis ĝis nun. Kaj vi ne povos, ŝajnas al mi, iri hodiaŭ grandan distancon ĉiuokaze, ĉar vi estas lacegaj. Ankaŭ ni estas lacaj. Ni iros nun al sekreta loko, kiun ni posedas, iom malpli ol dek mejlojn de ĉi tie. La orkoj kaj spionoj de la Malamiko ankoraŭ ne trovis ĝin, kaj se ili trovus, ni povus defendi ĝin longe eĉ kontraŭ multaj. Tie ni povos kaŝiĝi kaj ripozi iom da tempo, kaj vi kune kun ni. Matene mi decidos, kion mi plej bone faru, kaj ankaŭ vi.

Nenion povis fari Frodo krom konsenti kun tiu propono aŭ ordono. Tio ŝajnis ĉiuokaze saĝa faro provizora, ĉar la atako de la viroj el Gondoro igis la vojaĝon en Itilio pli danĝera ol antaŭe.

Tuj ili ekiris: Mablungo kaj Damrodo iom antaŭe, kaj Faramiro, Frodo kaj Sam poste. Flankpasante la proksiman bordon de la lageto, en kiu lavis sin la hobitoj, ili transiris la fluon, grimpis longan deklivon kaj eniris verdombrajn arbarojn, kiuj etendiĝis ĉiam suben kaj okcidenten. Dum ili marŝis, tiel rapide kiel kapablas la hobitoj, ili interparolis per sordinitaj voĉoj.

— Mi interrompis nian kunparolon, — diris Faramiro. — Ne nur ĉar la tempo urĝas, kiel mastro Samsaĝo memorigis al mi, sed ankaŭ ĉar ni proksimiĝis al aferoj, prefere ne diskutotaj aperte antaŭ multaj homoj. Pro tiu kialo mi turnis min prefere al la afero de mia frato kaj ignoris la *Plagon de Isilduro*. Vi ne traktis min tute malkaŝe, Frodo.

— Mi ne mensogis, kaj rakontis tiom da vero kiom mi povis.

— Mi ne kulpigas vin, — diris Faramiro. — Vi parolis lerte en malfacila situacio, kaj ŝajnas al mi, ke saĝe. Sed mi eksciis aŭ konjektis pri vi pli ol diris viaj vortoj. Vi ne estis amikeca al Boromiro, aŭ vi ne disiĝis amike. Vi kaj mastro Samsaĝo supozeble havas ian plendmotivon. Nu, mi amis lin kore, kaj volonte venĝus lian morton, tamen mi bone konis lin. La *Plago de Isilduro*... mi konjektas, ke la *Plago de Isilduro* kuŝis inter vi kaj estis kaŭzo de disputoj en via Kunularo. Evidente ĝi estas potenca heredaĵo, kaj tiaj aĵoj ne kreas pacon inter aliancanoj, se oni povas lerni el antikvaj historioj. Ĉu mi ne trafas proksime al la celcentro?

— Proksime, — diris Frodo, — sed ne en la oron. Ne okazis disputoj en nia Kunularo, kvankam ekzistis dubo: dubo pri la vojo irota el la Emin Muilo. Sed kiel ajn estas, antikvaj historioj ankaŭ instruas al ni pri la danĝero de malprudentaj vortoj pri tiaj aĵoj kiaj... heredaĵoj.

— Ha, okazis do tiel, kiel mi supozis: via problemo fontis nur el Boromiro. Li deziris tiun aĵon porti al Minaso Tirit. Ve! estas kurba sorto, kiu sigelas la lipojn de tiu, kiu laste vidis lin, kaj forbaras al mi tion, kion mi sopiras scii: kio estis en lia koro kaj pensoj dum la lastaj horoj. Ĉu li eraris aŭ ne, sed mi estas certa, ke li mortis bone, plenumante ian bonan faron. Lia vizaĝo estis eĉ pli bela ol dum la vivo.

» Sed, Frodo, mi komence premis forte vin pri la *Plago de Isilduro*. Pardonu min! Tio estas malsaĝa je tia horo kaj en tia loko. Al mi mankis tempo por pripensi. Ni travivis duran batalon, kaj estis pli ol sufiĉo por plenigi mian menson. Sed eĉ dum mi parolis al vi, mi pliproksimiĝis al la celpunkto, kaj tial intence pafis flanken. Ĉar necesas scii, ke multo estas konservita el la pratempa klero, kiu ne estas disvastigita, inter la Regantoj

de la urbo. Ni en mia domo ne devenis de la Elendila linio, kvankam en ni estas la sango de Numenoro. Ĉar ni retrokalkulas nian linion al Mardilo, la bona vokto kiu regis anstataŭ la reĝo, kiam tiu foriris al milito. Kaj tiu reĝo estis Earnuro, la lasta en la linio de Anariono, kaj seninfana, kaj li neniam revenis. Kaj la voktoj regis la urbon de post tiam, kvankam tio estis antaŭ multaj homaj generacioj.

» Kaj jenon mi memoras pri Boromiro knabaĝa, kiam ni kune lernis la rakonton pri niaj antaŭuloj kaj la historion de nia urbo, ke ĉiam malplaĉis al li, ke lia patro ne estas reĝo. "Kiom da jarcentoj necesas por reĝigi reganton, se la reĝo ne revenas?" — li demandis. "Malmultaj jaroj, eble, en aliaj lokoj malpli reĝecaj, — mia patro respondis. — En Gondoro dek mil jaroj ne sufiĉus". Ve! povra Boromiro. Ĉu tio ne konigas al vi ion pri li?

— Jes, — diris Frodo. — Tamen ĉiam li traktis Aragornon honorige.

— Mi tion ne dubas, — diris Faramiro. — Se li estis kontenta pri la pretendo de Aragorno, kiel vi diras, li certe ege respektis lin. Sed ankoraŭ ne venis la krizpunkto. Ili ankoraŭ ne atingis Minason Tirit aŭ rivaliĝis en ties militoj. Sed mi devias. Ni en la domo de Denetoro konas multan antikvan kleron pro longa tradicio, kaj krome tie en niaj trezorejoj estas konservitaj multaj aĵoj: libroj kaj tabuloj skribitaj sur velkaj pergamenoj, jes, kaj sur ŝtonoj, kaj sur folioj de arĝento kaj de oro, laŭ diversaj literaroj. Iujn neniu nun scias legi; kaj koncerne la ceterajn, malmultaj iam malŝlosas ilin. Mi scias iom legi en ili, ĉar mi estas instruita. Ĝuste tiuj kronikoj venigis al ni la Grizan Pilgrimanton. Mi la unuan fojon vidis lin, kiam mi estis infano; kaj li venis du- aŭ tri-foje post tiam.

— La Griza Pilgrimanto, ĉu? — diris Frodo. — Ĉu li havis nomon?

— Mitrandiro ni nomis lin laŭ la elfa maniero, kaj li estis kontenta. Li diris: *Multaj estas miaj nomoj en multaj landoj. Mitrandiro inter la elfoj; Tarkuno laŭ la gnomoj; Olorino mi estis dum mia juneco forgesita en la okcidento, en la sudo Inkanuso, en la nordo Gandalfo; al la oriento mi ne iras*.

— Gandalfo! — diris Frodo. — Mi pensis, ke tiu estas li. Gandalfo la Griza, la plej kara el la konsilistoj. Estro de nia Kunularo. Li pereis en Morio.

— Mitrandiro pereis, ĉu? — diris Faramiro. — La misa sorto verŝajne persekutis vian Kunularon. Estas vere malfacile kredi, ke iu tiel saĝega kaj potenca — ĉar multajn mirindaĵojn li faris inter ni — povis perei, kaj tiom da klero estu forprenita el la mondo. Ĉu vi certas pri tio, kaj ke li ne simple forlasis vin kaj iris, kien li volis?

— Ve! jes. Mi vidis lin fali en la abismon.

— Mi konstatas, ke en tio estas ia granda historio timiga, — diris

Faramiro, — kiun vi eble rakontos al mi vespere. Mitrandiro estis, mi jam supozas, pli ol klermastro: granda movanto de la faroj en nia tempo. Se li estus konsultebla inter ni pri la duraj vortoj de mia sonĝo, li povus klarigi ilin al ni sen la neceso de kuriero. Tamen eble li tion ne farus, kaj la vojaĝo de Boromiro estis antaŭdestinita. Mitrandiro neniam parolis al ni pri la okazontaĵoj, kaj li ankaŭ ne malkaŝis siajn celojn. Li ricevis permeson de Denetoro, la kielon mi ne scias, rigardi la sekretojn de nia trezorejo, kaj mi iom lernis de li, kiam li konsentis instrui (kio okazis malofte). Ĉiam li volis serĉi kaj kutimis pridemandi nin antaŭ ĉio pri la Granda Batalo okazinta sur Dagorlado je la komenciĝo de Gondoro, kiam Li, kiun ni ne nomas, estis venkita. Kaj li avidis rakontojn pri Isilduro, kvankam pri tiu ni povis malpli multe rakonti, ĉar nenio certa iam estis konata inter ni pri ties morto. La voĉo de Faramiro flustriĝis.

— Sed almenaŭ tion mi eksciis, aŭ divenis, kaj ĉiam poste tenis sekreta en mia koro, ke Isilduro prenis ion el la mano de l' Sennomulo antaŭ ol foriri de Gondoro, neniam plu vidota inter la mortemuloj. Tion mi supozis la respondo al la demandoj de Mitrandiro. Sed ĝi ŝajnis tiam afero, kiu koncernis nur la esplorantojn pri antikvaj scioj. Ankaŭ kiam la perpleksaj vortoj estis debatataj inter ni, mi ne taksis la *Plagon de Isilduro* kiel la saman aferon. Ĉar Isilduro estis embuskita kaj lin mortigis orkaj sagoj, laŭ la sola legendo, kiun ni konis, kaj Mitrandiro neniam sciigis al mi ion plian.

» Kio tiu aĵo vere estas, mi ankoraŭ ne povas diveni, sed heredaĵo potenca kaj danĝera ĝi devas esti. Fia armilo eble, inventita de la Malhela Mastro. Se ĝi estis io avantaĝa en batalo, mi volonte kredas, ke Boromiro, tiu sentima fierulo, ofte malprudenta, ĉiam deziranta venkon por Minaso Tirit (kaj la propran gloron inkluzive), eble dezirus tian aĵon kaj estus logita de ĝi. Ve, ke li entute iris tiucele! Mi devis esti elektita de mia patro kaj la pliaĝuloj, sed li proponis sin, ĉar li estis la pli aĝa kaj pli fortika (ambaŭ estas veraj), kaj li rifuzis cedi.

» Sed jam ne timu! Mi ne prenus tian aĵon, se ĝi kuŝus apud la vojo. Ne, eĉ se Minaso Tirit estus ruiniĝanta, kaj sole mi kapablus savi ĝin, uzante la armilon de la Malhela Mastro por ĝia bono kaj mia gloro. Ne, mi ne volas tian triumfon, Frodo, filo de Drogo.

— Ankaŭ la Konsilio ne volis, — diris Frodo. — Ankaŭ ne mi. Mi neniel partoprenus tiajn aferojn.

— Koncerne min, — diris Faramiro, — mi volus vidi la Blankan Arbon floranta denove en la korto de la reĝoj, kaj la revenon de l' Arĝenta Krono, kaj Minason Tirit en paco: ree Minaso Anor kiel en la pratempo, plena je lumo, alta kaj bela, bela kiel reĝino inter aliaj reĝinoj, ne mastrino de multaj sklavoj, eĉ ne bonkora mastrino de volontaj sklavoj. Milito devas esti, dum

ni defendas niajn vivojn kontraŭ la detruisto, kiu volas vori ĉion; sed mi ne amas la helan glavon pro ties akreco, nek la sagon pro ties rapideco, nek la batalanton pro lia gloro. Nur tion mi amas, kion ili defendas: la urbon de la homoj el Numenoro; kaj mi volas, ke ĝi estu amata pro sia memoro, sia antikveco, sia belo, kaj sia nuna saĝo. Ne timata, krom kiel homoj eble timas la dignon de homo maljuna kaj saĝa. Do, ne timu min! Mi ne postulas, ke vi sciigu al mi pli. Mi eĉ ne demandas, ĉu mi jam parolas pli celtrafe. Sed se vi fidos al mi, eble mi povos konsili vin rilate vian nunan serĉon, kio ajn ĝi estas, jes, kaj eĉ helpi vin.

Frodo nenion respondis. Li preskaŭ cedis al la deziro por helpo kaj konsilo, rakonti al tiu serioza junulo, kies vortoj ŝajnis tiom saĝaj kaj justaj, ĉion en sia menso. Sed io baris tion al li. Lia koro estis peza pro timo kaj malĝojo: se li kaj Sam estis efektive, kiel ŝajnis probabla, la sola restaĵo el la Naŭ Marŝantoj, tiam li estis la sola disponanto de l' sekreto de ilia misio. Prefere senmerita malfido ol vortoj malprudentaj. Kaj la memoro pri Boromiro, pri la terura ŝanĝiĝo, kiun kaŭzis al li la logo de la Ringo, estis ĉiam ĉeesta en lia menso, kiam li rigardis Faramiron kaj aŭskultis ties voĉon: diferencaj ili estis, kaj tamen tre parencaj.

Ili marŝis silente antaŭen dum kelka tempo, pasante kiel grizaj kaj verdaj ombroj sub la maljunaj arboj, la piedoj kaŭzantaj neniun sonon; supre kantis multaj birdoj, kaj la suno ekbrilis sur la polurita plafono el malhelaj folioj en la ĉiamverda arbaro de Itilio.

Sam ne partoprenis la konversacion, kvankam li aŭskultis ĝin; kaj samtempe li atentis per siaj akraj hobitaj oreloj ĉiujn mallaŭtajn arbarajn bruojn ĉirkaŭ ili. Unu aferon li rimarkis, ke dum la tuta parolado la nomo de Golumo eĉ unufoje ne estis menciita. Li estis kontenta, kvankam li sentis tro optimisma la esperon, ke li neniam plu aŭdos ĝin. Li baldaŭ konstatis ankaŭ, ke, kvankam ili marŝis solaj, multaj homoj estas proksime: ne nur Damrodo kaj Mablungo flirtantaj en kaj el la ombroj antaŭe, sed ankaŭ aliaj ambaŭflanke, ĉiuj irantaj rapide kaj sekrete al iu destinita loko.

Unufoje, subite retrorigardante, kvazaŭ iu juko atentigus lin, ke li estas rigardata deposte, al li ŝajnis, ke li ekvidas etan malhelan figuron kaŝiĝantan malantaŭ arbotrunko. Li malfermis sian buŝon parolonte kaj refermis ĝin. "Mi ne certas, — li diris al si, — kaj kial mi memorigu ilin pri la maljuna kanajlo, se ili elektis forgesi lin? Mi ŝatus mem forgesi!"

Do, ili pluiris, ĝis la arbaro maldensiĝis, kaj la tereno komencis subeniri pli krute. Tiam ili denove flankenturniĝis, dekstren, kaj baldaŭ alvenis rivereton en mallarĝa kanjoneto: tiu estis la sama rojo, kiu likiĝis el la ronda lageto tre supre, jam iĝinta rapida torento, saltanta malsupren trans multajn ŝtonojn sur profunde fendita bedo, superkreskita de ileksoj kaj etaj buksoj.

Okcidente ili povis vidi, sub ili en lumnebuleto, ebenaĵojn kaj larĝajn herbejojn, kaj la larĝajn akvojn de Anduino ekbrilantaj malproksime sub la okcidentiĝa suno.

— Ĉi tie, ho ve! mi devas trakti vin malĝentile, — diris Faramiro. — Mi esperas, ke vi pardonos tion al iu, kiu ĝis nun ĝentile esprimis siajn ordonojn kaj nek mortigis, nek ligis vin. Sed estas ordonite, ke neniu fremdulo, eĉ ne iu el Rohano, kiu batalas apud ni, vidu la padon nun irotan per okuloj nekovritaj. Ni devas blindumi vin.

— Laŭ via volo, — diris Frodo. — Eĉ la elfoj tion faras laŭnecese, kaj blindumite ni transiris la limon de la bela Lotlorieno. La gnomo Gimlio malvolonte akceptis tion, sed la hobitoj ĝin toleris.

— Al loko ne tiom bela mi kondukos vin, — diris Faramiro. — Sed mi ĝojas, ke vi akceptos tion volonte kaj ne perforte.

Li mallaŭte vokis, kaj tuj Mablungo kaj Damrodo paŝis el inter la arboj kaj revenis al li.

— Blindumu tiujn gastojn, — diris Faramiro. — Firme, sed ne tiel, ke ili sentu malkomforton. Ne ligu iliajn manojn. Ili promesos ne provi ekvidi. Mi povas fidi, ke ili propravole fermu siajn okulojn, sed la okuloj nepre palpebrumas, se la piedoj stumblas. Konduku ilin tiel, ke ili ne hezitu.

Per verdaj skarpoj la du gardistoj kovris la okulojn de la hobitoj, kaj subentiris la kapuĉojn preskaŭ ĝis iliaj buŝoj; poste ili rapide prenis mane po unu kaj daŭrigis sian vojon. Ĉion, kion Frodo kaj Sam sciis pri tiu lasta vojmejlo, ili lernis per nura konjektado. Post iom da tempo ili konstatis, ke ili marŝas laŭ pado, kiu descendas apike; baldaŭ ĝi tiel mallarĝiĝis, ke ili iris spalire, frotante ŝtonan muron ambaŭflanke; iliaj gardantoj stiris ilin deposte per manoj kroĉante firme iliajn ŝultrojn. De tempo al tempo ili alvenis lokojn malebenajn kaj estis suprenlevitaj kelkan tempon kaj poste restarigitaj. Ĉiam la bruo de la fluanta akvo aŭdiĝis dekstre, kaj ĝi pli kaj pli proksimiĝis kaj laŭtiĝis. Finfine oni haltigis ilin. Rapide Mablungo kaj Damrodo girigis ilin plurfoje, kaj ili perdis sian direktosenton. Ili iomete grimpis supren: sentiĝis malvarmo, kaj bruo de la rojo estis mallaŭta. Poste ili estis levitaj kaj subenportitaj, suben laŭ multaj ŝtupoj, kaj ĉirkaŭ angulon. Subite ili aŭdis denove la akvon, jam laŭtan, rapidan kaj plaŭdan. Ĝi ŝajnis ĉie ĉirkaŭe, kaj ili sentis fajnajn gutojn sur la manoj kaj vangoj. Finfine oni starigis ilin denove. Momente ili staris tiel, duone timantaj, blindumite, ne sciante, kie ili estas; kaj neniu parolis.

Tiam aŭdiĝis la voĉo de Faramiro proksime post ili.

— Ili vidu! — li diris. La skarpoj estis forigitaj kaj suprenŝovitaj la kapuĉoj, kaj ili palpebrumis kaj spasme spiris.

Ili staris sur malseka planko el polurita ŝtono, la sojlo tiel-dire de krude

hakita rokpordo malhele aperta malantaŭ ili. Sed antaŭe maldensa akvovualo estis pendigita, tiel proksime, ke Frodo povus ŝovi en ĝin etenditan brakon. Ĝi frontis okcidenten. La ebenaj radioj de l' subiranta suno malantaŭe trafis ĝin, kaj ties ruĝa lumo frakasiĝis je multaj flagraj radioj el ĉiamvaria koloro. Estis kvazaŭ ili starus antaŭ fenestro de elfa turo, kurtenita de treditaj juveloj el arĝento kaj oro, kaj rubenoj, safiroj kaj ametistoj, ĉiuj ĉenditaj per ĉionkonsuma fajro.

— Almenaŭ ni venis bonŝance je la ĝusta horo por kompensi vian paciencon, — diris Faramiro. — Tio estas la Fenestro de l' Sunsubiro, Heneto Anun, la plej bela el la akvofaloj de Itilio, lando de multaj fontanoj. Malmultaj fremduloj vidis ĝin. Sed ne troviĝas reĝeca halo malantaŭe por egali ĝin. Eniru jam kaj vidu!

Ĝuste dum li parolis, la suno sinkis, kaj la fajro forvelkis en la fluanta akvo. Ili turnis sin kaj eniris sub la malalta timiga arkaĵo. Tuj ili trovis sin en roka ĉambro, larĝa kaj kruda, kun malebena kliniĝa plafono. Kelkaj torĉoj estis fajrigitaj kaj ĵetis malfortan lumon al la briletantaj muroj. Multaj viroj jam ĉeestis. Aliaj ankoraŭ envenis po du kaj tri tra malhela mallarĝa pordo je unu flanko. Kiam iliaj okuloj kutimiĝis al la ombreco la hobitoj vidis ke la kaverno estas pli granda ol ili supozis kaj estas plenigita de granda kvanto da armiloj kaj nutraĵoj.

— Nu, jen nia rifuĝejo, — diris Faramiro. — Ne grandkomforta loko, sed ĉi tie vi povos pasigi trankvile la nokton. Almenaŭ ĝi estas seka, kaj troviĝas manĝaĵo, kvankam ne fajro. Iam la akvo subenfluis tra tiu ĉi kaverno kaj eksteren pere de l' arkaĵo, sed ĝia direkto estis ŝanĝita pli alte en la kanjoneto, de pratempaj laboristoj, kaj la rojo estis sendita suben en falo duoble alta super la rokoj supre. Ĉiuj enirejoj al tiu ĉi groto estis poste sigelitaj kontraŭ eniro de akvo aŭ io alia, krom nur unu. Ekzistas nun nur du elirejoj: tiu pasejo, laŭ kiu vi venis blindumite kaj la fenestrokurteno en profundan basenon plenan de tranĉilecaj ŝtonoj. Jam ripozu iom, ĝis la vespera manĝo estos preta.

La hobitojn oni kondukis al angulo, kaj ili ricevis malaltan liton, sur kiu ili kuŝu laŭplaĉe. Dume homoj okupiĝis tra la kaverno, kviete kaj kun orda rapideco. Malpezaj tabloj apogitaj al la muroj estis metitaj sur stablojn kaj ŝarĝitaj je manĝilaro. Ĝi estis plejparte ordinara kaj senornama, sed fortike kaj faklerte farita: rondaj pladoj, bovloj kaj ujoj el glazura bruna argilo aŭ tornita buksligno, glata kaj pura. Ie-tie estis taso aŭ pelvo el polurita bronzo; kaj kaliko el senornama arĝento estis metita antaŭ la sidloko de la militestro meze de la plej interna tablo.

Faramiro ĉirkaŭiris inter la homoj, pridemandante ĉiun, kiam tiu venis, per voĉo mallaŭta. Iuj revenis el persekutado de la sudanoj; aliaj, postlasitaj

kiel skoltoj proksime al la vojo, venis laste. Ĉiuj sudanoj estis prinotitaj, krom nur la granda mumako: kio okazis al ĝi, neniu povis diri. De la malamikoj neniu moviĝo estis rimarkebla; neniu orka spiono moviĝis.

— Vi vidis kaj aŭdis nenion, Anborno, ĉu? — Faramiro demandis al la plej lasta veninto.

— Nu, ne, estro, — diris tiu. — Almenaŭ neniun orkon. Sed mi vidis, aŭ supozis vidi, ion iomete strangan. Ekkrepuskiĝis profunde, kiam okuloj pligrandigas pli ol devus esti. Do eble tio estis nenio pli ol sciuro. — Je tio Sam ekatentis. — Tamen se jes, ĝi estis sciuro nigra, kaj voston mi ne vidis. Ĝi similis ombron sur la tero, kaj ĝi saltis malantaŭ arbotrunkon, kiam mi proksimiĝis, kaj suprengrimpis tiel rapide kiel iu ajn sciuro. Vi ne volas, ke ni mortigu sovaĝajn bestojn sencele, kaj tiu ne ŝajnis alia, do mi sagon ne ekspedis prove. Estis ĉiuokaze tro mallume por certa pafado, kaj la kreaĵo malaperis en la senlumon de la folioj fulmrapide. Sed mi restis kelkan tempon, ĉar tio ŝajnis stranga, kaj poste mi rerapidis. Ŝajnas al mi, ke mi aŭdis tiun aĵon sibli al mi, kiam mi forturniĝis. Sciurego, eble. Eble sub la ombro de la Sennomulo iuj bestoj el Mornarbaro vagas ĉi tien al nia arbaro. Tie la sciuroj estas nigraj, onidire.

— Eble, — diris Faramiro. — Sed tio estas misaŭguro, se tiel estas. Ni ne deziras la fuĝintojn el Mornarbaro en Itilio.

Sam opiniis, ke li haste ekrigardis la hobitojn dumparole, sed Sam diris nenion. Dum iom da tempo li kaj Frodo dorsapogiĝis kaj rigardis la torĉlumon kaj la homojn irantajn tien-reen parolantajn per sordinitaj voĉoj. Tiam subite Frodo endormiĝis.

Sam luktis kontraŭ sin, argumentante tiel kaj aliel. “Li eble enordas, — li pensis, — tamen aliflanke eble ne. Belaj paroloj eble kaŝas fian koron. — Li oscedis. — Mi povus tradormi tutan semajnon, kaj tio bonfarus al mi. Kaj kion mi povas fari, eĉ se mi maldormas, nur mi sola, kaj inter tiuj grandaj homoj? Nenion, Sam Vato; sed vi devas maldormi ĉiuokaze”. Kaj iel li sukcesis je tio. La lumo forvelkis de la kaverna pordo, kaj la griza vualo de falanta akvo malheliĝis kaj perdiĝis en kreskanta ombro. Ĉiam la sono de la akvo daŭris, neniam ŝanĝante sian tonon, matene, vespere aŭ nokte. Ĝi murmuris kaj flustris pri dormo. Sam frotis la okulojn per la fingrartikoj.

Nun pliaj torĉoj estis fajrigitaj. Bareleto da vino estis truita. Konservaj bareloj estis malfermataj. Viroj alportis akvon el la akvofalo. Iuj lavis siajn manojn en pelvoj. Larĝa kupra pelvo kaj blanka tuko estis portitaj al Faramiro, kaj li sin lavis.

— Veku niajn gastojn, — li diris, — kaj portu al ili akvon. Estas la manĝohoro.

Frodo sidiĝis, oscedis kaj streĉis sin. Sam, ne kutimiĝinte al servado, rigardis iom surprizite la altulon, kiu riverencis, tenante antaŭ li pelvon da akvo.

— Metu ĝin teren, mastro, mi petas! — li diris. — Pli facile por mi kaj por vi. — Poste, mirige kaj amuze por la homoj, li plonĝigis sian kapon en la malvarman akvon kaj plaŭdigis ĝin sur siajn nukon kaj orelojn.

— Ĉu en via lando oni kutime lavas la kapon antaŭ la vespermanĝo? — demandis la viro, kiu servis al la hobitoj.

— Ne, antaŭ la matenmanĝo, — diris Sam. — Sed se mankas dormo, malvarma akvo sur la nuko efikas kiel pluvo sur velka laktuko. Jen! Jam mi povos maldormi sufiĉe longe por manĝi iomete.

Oni kondukis ilin poste al sidlokoj apud Faramiro: bareloj felokovritaj kaj sufiĉe pli altaj ol la benkoj por la homoj por konveni al ili. Antaŭ ol ekmanĝi Faramiro kaj ĉiuj liaj viroj turnis sin fronte al la okcidento dum momenta silento. Faramiro signalis al Frodo kaj Sam, ke ankaŭ ili faru same.

— Tion ni ĉiam faras, — li diris residiĝinte: — ni rigardas al Numenoro estinta, kaj transe al Elfhejmo estanta, kaj al tio, kio estas trans Elfhejmo kaj ĉiam estos. Ĉu vi havas similan kutimon antaŭmanĝan?

— Ne, — diris Frodo, sentante sin strange kamparaneca kaj neinstruita. — Sed se ni estas gastoj, ni riverencas al la gastiganto, kaj manĝinte ni stariĝas kaj dankas lin.

— Tion ankaŭ ni faras, — diris Faramiro.

Post tiom longa vojaĝado kaj bivakado, kaj tagoj pasigitaj en la soleca sovaĝejo, la vespera manĝo ŝajnis al la hobitoj festo: trinki palan flavan vinon, friskan kaj bonodoran, manĝi buterpanojn kaj salitajn viandojn, kaj sekigitajn fruktojn, kaj bonan ruĝan fromaĝon, per la puraj manoj kaj puraj tranĉiloj kaj teleroj. Nek Frodo, nek Sam rifuzis ion ajn proponitan, ankaŭ ne la duan porcion, nek efektive la trian. La vino trafluis iliajn vejnojn kaj lacajn membrojn, kaj ili estis ĝojaj kaj facilanimaj, kiaj ili ne estis de kiam ili forlasis la landon Lorieno.

Kiam ĉio estis finita, Faramiro kondukis ilin al alkovo funde de la kaverno, parte ekranita per kurtenoj; kaj seĝon kaj du taburetojn oni alportis tien. Eta argila lampo lumis en niĉo.

— Vi eble baldaŭ deziros dormi, — li diris, — kaj precipe la bona Samsaĝo, kiu ne volis fermi la okulojn antaŭmanĝe: ĉu pro timo, ke li malakrigos la eĝon de nobla malsato, aŭ pro timo pri mi, mi ne scias. Sed ne estas bone, tro baldaŭ ekdormi postmanĝe, precipe sekve de fastado. Ni interparolu iomete. Dum via vojaĝo el Rivendelo certe okazis multaj aferoj rakontindaj. Kaj ankaŭ vi eble volas ekscii iom pri ni kaj la lando, en kiu vi

nun estas. Rakontu al mi pri mia frato Boromiro kaj pri maljuna Mitrandiro, kaj pri la bravaj personoj en Lotlorieno.

Frodo jam ne sentis dormemon kaj volonte pretis paroli. Sed malgraŭ tio, ke la manĝaĵoj kaj vino malstreĉis lin, li ne tute perdis sian prudenton. Sam estis ridetanta kaj murmuranta al si, sed kiam Frodo ekparolis, li estis komence kontenta aŭskulti, nur de tempo al tempo riskante eligi konsentan krieton.

Frodo rakontis multajn historiojn, tamen ĉiam li forturnis la temon for de la celo de la Kunularo kaj de la Ringo, prefere insistante pri la kuraĝa rolo de Boromiro en ĉiuj aventuroj: kun la lupoj en la sovaĝejo, en la neĝo sub Karadraso kaj en ŝaktoj de Morio, kie Gandalfo pereis. Faramiro plej emociiĝis pri la historio de la surponta batalo.

— Certe ĝenis Boromiron forkuri de la orkoj, — li diris, — aŭ eĉ de la terura estaĵo nomita de vi, la Balrogo, malgraŭ tio, ke li laste foriris.

— Li estis la lasta, — diris Frodo, — sed Aragorno devis gvidi nin. Nur li konis la vojon post la pereo de Gandalfo. Sed se ni malplivaloruloj ne estus prizorgendaj, al mi ŝajnas, ke nek li nek Boromiro fuĝus.

— Eble estus pli bone, se Boromiro pereus tie kun Mitrandiro, — diris Faramiro, — kaj ne pluirus ĝis la sorto, kiu atendis lin super la akvofaloj de Raŭroso.

— Eble. Sed nun rakontu al mi pri viaj propraj travivaĵoj, — diris Frodo ankoraŭfoje forturnante la temon. — Ĉar mi volas ekscii pli pri Minaso Itil kaj Osgiliado, kaj Minaso Tirit la longedaŭra. Kion vi esperas pri tiu urbo en via longa milito?

— Kion ni esperas? Jam delonge ni ne havas esperon. La glavo de Elendilo, se ĝi fakte revenos, eble reardigos ĝin, sed mi ne kredas, ke tio faros pli ol prokrasti la plagan tagon, krom se venos ankaŭ alia neantaŭvidita helpo de elfoj aŭ homoj. Ĉar la Malamiko plimultiĝas, kaj ni malmultiĝas. Ni estas popolo velkanta, aŭtuno senprintempa.

» La homoj de Numenoro ekloĝis tre vaste sur la bordoj kaj apudmaraj regionoj de la Grandaj Landoj, sed plejparte ili kutimiĝis al misfaroj kaj stultaĵoj. Multaj enamiĝis al la Mallumo kaj la nigraj artoj; iuj transdonis sin tute al mallaboremo kaj lukso, kaj iuj batalis inter si, ĝis ili estis venkitaj pro sia malforto de la sovaĝuloj.

» Oni ne diras, ke oni iam praktikis la misajn artojn en Gondoro, nek ke la Sennomulo iam estis tie nomita honore; kaj la malnovaj saĝo kaj belo kunportitaj el la okcidento restis longe en la regno de l’ filoj de Elendilo la Bela, kaj ili ankoraŭ restas tie. Tamen malgraŭ tio estis Gondoro, kiu kaŭzis la propran putriĝon, iom post iom kadukiĝante kaj pensante, ke la Malamiko dormas, kiu estis nur elpelita, ne detruita.

» Morto ĉiam ĉeestis, ĉar la numenoranoj daŭre, kiel en la malnova regno kaj tial ili perdis ĝin, sopiris senifinan vivon senŝanĝan. Reĝoj konstruis tombojn pli majestajn ol domoj de la vivantoj, kaj taksis malnovajn nomojn en la analoj de siaj generacioj pli karaj ol la nomojn de filoj. Seninfanaj princoj sidis en antikvaj haloj meditante pri heraldiko; en sekretaj ĉambroj kadukuloj kreis fortajn eliksirojn, aŭ en altaj malvarmaj turoj starigis demandojn al la steloj. Kaj la lasta reĝo en la linio de Anariono malhavis heredonton.

» Sed la regantoj estis pli saĝaj kaj pli bonŝancaj. Pli saĝaj, ĉar ili varbis la forton de nia popolo inter la fortikuloj de l' marbordo kaj inter la harditaj montaranoj de Eredo Nimrajs. Kaj ili interkonsentis militpaŭzon kun la fieraj popoloj de la nordo, kiuj ofte atakis nin, homoj feroce kuraĝaj, sed niaj parencoj el malproksimo, malkiel la sovaĝaj orientanoj aŭ la kruelaj haradanoj.

» Tial okazis dum la tagoj de Ciriono la Dek-dua Reganto (kaj mia patro estas la dudek-sesa), ke ili rajdis helpe al ni kaj sur la granda Kampo de Celebranto ili detruis niajn malamikojn, kiuj kaptis niajn nordajn provincojn. Tiuj estis la rohananoj, kiel ni nomas ilin, mastroj de l' ĉevaloj, kaj ni cedis al ili la kampojn de Kalenardhono, kiuj de tiam nomiĝas Rohano; ĉar tiu provinco estis delonge malmulte loĝata. Kaj ili fariĝis niaj aliancanoj, kaj ĉiam pruviĝis lojalaj al ni, helpante nin laŭbezone, kaj gardante niajn nordajn limregionojn kaj la Breĉon de Rohano.

» Pri niaj klero kaj kutimoj ili lernis tiom, kiom ili volis, kaj iliaj estroj parolas nian lingvon laŭbezone; tamen plejparte ili sekvas la kutimojn de siaj propraj prapatroj kaj la proprajn memorojn, kaj inter si ili parolas la propran nordan lingvon. Kaj ni amas ilin: altaj viroj kaj belaj virinoj, ambaŭ same kuraĝaj, orhararaj, helokulaj kaj fortaj; ili memorigas nin pri la juneco de la homoj, kiaj ili estis dum la Praaj Tagoj. Efektive, estas dirite de niaj kleruloj, ke ili ekde la pratempo havas kun ni parencecon: ili devenas de tiuj samaj Tri Domoj de Homoj, kiel la numenoranoj en la komenco; eble ne de Hadoro la Orharara, tiu elf-amiko, tamen de tiuj el ties filoj kaj popolo, kiuj ne iris transmaren al la okcidento, rifuzinte la alvokon.

» Ja tiel ni taksas la homojn en nia klero, nomante ilin la Altaj, aŭ Homoj de l' Okcidento, kiuj estis numenoranoj; kaj la Mezaj Popoloj, Homoj de l' Krepusko, kiuj estas la rohananoj kaj ties parencaro kiuj daŭre loĝas en la nordo; kaj la Sovaĝuloj, la Homoj de l' Mallumo.

» Tamen nun, kvankam la rohananoj kelkrilate plisimiliĝis al ni, pli spertaj pri la artoj kaj mildeco, ankaŭ ni plisimiliĝis al ili, kaj ni apenaŭ rajtas plu pretendi la titolon Alta. Ni fariĝis Meza Popolo, de la Krepusko, sed memorante aliajn aferojn. Samkiel la rohananoj ni amas jam militon kaj

kuraĝon kiel en si mem bonajn, tiel sporton kiel celon; kaj kvankam ni ankoraŭ opinias, ke batalisto devas havi aliajn kapablojn kaj konojn ol la nuran lerton pri armiloj kaj mortigado, ni estimas batalistojn malgraŭ tio pli alte ol la alimetiajn homojn. Tia estas la postulo de nia epoko. Tia estis eĉ mia frato Boromiro: viro bravega, kaj pro tio oni taksis lin la plej elstara viro de Gondoro. Kaj efektive tre valora li estis: neniu heredonto de Minaso Tirit dum longaj jaroj estis tiel hardita en laboro, tiel antaŭenira en batalo, aŭ blovis pli potencan noton per la Granda Korno.

Faramiro suspiris kaj dum iom da tempo silentiĝis.

— Pri la elfoj vi ne diras multon en viaj rakontoj, sinjoro, — diris Sam, subite ekkuraĝiĝante. Li rimarkis, ke Faramiro ŝajnis aludi elfojn kun respekto, kaj tio eĉ pli ol lia ĝentileco, kaj liaj manĝaĵo kaj vinoj, gajnis la respekton de Sam kaj kvietigis liajn suspektojn.

— Efektive ne, mastro Samsaĝo, — diris Faramiro, — ĉar mi ne estas instruita pri elfa klero. Sed tiel vi tuŝis alian punkton, rilate al kiu ni ŝanĝiĝis, dekliniĝante de Numenoro al Mez-Tero. Ĉar kiel vi eble scias, se Mitrandiro estis via kunulo kaj vi parolis kun Elrondo, la edajnoj, la patroj de la numenoranoj, batalis apud la elfoj dum la unuaj militoj, kaj estis rekompencitaj per donaco de la regno meze en la maro, videbla de Elfhejmo. Sed en Mez-Tero, homoj kaj elfoj iĝis misrilataj pro la artoj de la Malamiko dum la mallumaj tagoj, kaj pro la malrapidaj ŝanĝiĝoj tempaj, dum kiuj ĉiu speco marŝadis plu laŭ siaj disiĝintaj vojoj. Homoj nun timas kaj pridubas la elfojn, kaj tamen scias malmulton pri ili. Kaj ni el Gondoro similiĝas al aliaj homoj, al la homoj el Rohano; ĉar eĉ ili, kiuj estas malamikoj de la Malluma Mastro, evitas la elfojn kaj parolas timplene pri la Ora Arbaro. Tamen inter ni ankoraŭ estas iuj, kiuj traktas kun la elfoj kiam eblas, kaj de tempo al tempo iras sekrete al Lorieno, malofte revenonte. Mi ne. Ĉar mi taksas nun danĝera tion, ke mortema homo intence serĉu la Pliaĝan Popolon. Tamen mi envias al vi, ke vi interparolis kun la Blanka Damo.

— La Damo de Lorieno! Galadriela! — ekkriis Sam. — Vi devus vidi ŝin, sinjoro, vere vi devus. Mi estas nur hobito, kaj kultivado estas hejme mia tasko, sinjoro, se vi komprenas min, kaj mi ne tre lertas pri poezio — ne pri verkado: ia komika rimaĵo, eble, de tempo al tempo, vi scias, ne poezio reala — do mi ne povas diri al vi, kion mi volas esprimi. Tio devus esti kantata. Por tio necesus Paŝegulo, alinome Aragorno, aŭ maljuna sinjoro Bilbo. Sed mi ŝatus verki kanton pri ŝi. Bela ŝi estas, sinjoro! Ĉarmega! Jen kiel granda arbo floranta, jen kiel blanka asfodelo, eta kaj svelta, ĉu ne. Diamante dura, lunlume mola. Sunlume varma, malvarma kiel frosto inter la steloj. Fiera kaj fora kiel neĝa monto, kaj tiel gaja kiel ajna junulino iam vidita de mi kun lekantetoj en la hararo dum printempo. Sed tio estas amaso da sensencaĵoj, kaj tute maltrafas la celon.

— Do ŝi devas esti vere elstare bela, — diris Faramiro. — Danĝere bela.

— Mi ne scias pri *danĝere*, — diris Sam. — Ŝajnas al mi, ke oni komprenas en Lorieno la propran danĝeron, kaj trovas ĝin tie, ĉar ili ĝin kunportis. Sed eble vi rajtus nomi ŝin danĝera, ĉar ŝi tiom fortas en si mem. Vi, vi povus frenezece disbati vin kontraŭ ŝin, kiel ŝipo kontraŭ rokon; aŭ droni, kiel hobito en rivero. Sed nek roko nek rivero kulpus. Nu, Boro... — Li silentiĝis kaj lia vizaĝo ruĝiĝis.

— Jes? *Nu, Boromiro*, vi volis diri? — diris Faramiro. — Kion vi volas diri? Ĉu ke li kunprenis sian danĝeron?

— Jes, sinjoro, pardonpete, kaj brava viro estis via frato, se mi rajtas

diri. Sed la tutan tempon vi spuris la predon. Nu, mi rigardis Boromiron kaj aŭskultis lin, la tutan vojon de Rivendelo — prizorgante mian mastron, kiel vi povas kompreni, kaj ne celante damaĝi al Boromiro — kaj mi opinias, ke en Lorieno li vidis la unuan fojon klare, kion mi pli frue divenis: kion li deziris. Ekde la momento kiam li unuafoje vidis ĝin, li deziris la Ringon de l' Malamiko!

— Sam! — kriis Frodo konsternite. Li profundiĝis kelkan tempon en propraj pensoj, kaj subite rekonsciiĝis, tro malfrue.

— Savu min! — diris Sam, blankiĝante kaj poste skarlatiĝante. — Jen mi denove! "Kiam ajn vi malfermas vian buŝon, vi faras fuŝon[10]", la Avulo kutimis diri al mi, kaj prave. Ho ve, ho ve! Nu, vidu, sinjoro! — li turniĝis fronte al Faramiro kun ĉiom da kuraĝo, kiom li povis retrovi. — Ne profitu de mia mastro pro tio, ke lia servanto estas tutsimple stultulo. Vi parolis tre bele la tutan tempon, malprudentigis min parolante pri elfoj kaj tiel plu. Sed *belaj faroj beligas*, ni diras. Jen okazo por montri vian kvaliton.

— Tiel ŝajnas, — diris Faramiro, malrapide kaj mallaŭte, kun stranga rideto. — Do jen la respondo al ĉiuj enigmoj! La Unu Ringo, kiu supozite lasis la mondon peree. Kaj Boromiro provis kapti ĝin perforte, ĉu? Kaj vi eskapis, ĉu? kaj kuris la tutan vojon... al mi! Kaj ĉi tie en la sovaĝejo mi havas vin: du duonuloj, kaj amaso da viroj vokeblaj de mi, kaj la Ringo el Ringoj. Bela turniĝo de l' fortuno! Okazo, ke Faramiro, militestro de Gondoro, montru sian kvaliton! Ha! — li rektiĝis, tre alta kaj severa, la grizaj okuloj ekbrilis.

Frodo kaj Sam salte forlasis siajn taburetojn kaj starigis sin dorse al la muro palpserĉante siajn glavtenilojn. Estiĝis silento. Ĉiuj homoj en la kaverno ĉesis paroli kaj alrigardis ilin mire. Sed Faramiro residiĝis sur sian seĝon kaj komencis mallaŭte ridi, kaj poste subite reserioziĝis.

— Ve pri Boromiro! Tro malfacila elprovo! Kiom vi plifortigis mian funebron, vi, du fremdaj vaguloj el fora lando, portantaj la danĝeron al homoj! Sed vi malpli kompetente juĝas homojn ol mi hobitojn. Ni, homoj el Gondoro, estas verparolantoj. Ni malofte fanfaronas kaj poste plenumas aŭ mortas klopodante. *Mi ne prenus tiun ĉi aĵon, se ĝi kuŝus apud la vojo*, mi diris. Eĉ se mi estus tia homo, kiu dezirus tiun aĵon, kaj kvankam mi ne sciis precize, kio ĝi estas, kiam mi parolis, mi taksus tiujn vortojn voto kaj konformiĝus al ili. Sed tia homo mi ne estas. Aŭ mi estas sufiĉe saĝa por scii, ke ekzistas certaj danĝeroj, de kiuj oni devas fuĝi. Sidiĝu trankvile! Kaj estu konsolita, Samsaĝo. Se ŝajnas, ke vi stumblis, pensu ke tio estis antaŭdestinita. Via koro estas tiel sagaca kiel fidela, kaj vidis pli klare ol viaj okuloj. Ĉar eĉ se ŝajnas strange, estis senriske deklari tion al mi. Tio eble eĉ helpos la mastron, kiun vi amas. La afero elturniĝos liaprofite, se

tion mi kapablos aranĝi. Do konsoliĝu. Sed neniam denove nomu tiun aĵon voĉe. Unufoje sufiĉas.

La hobitoj reiris al siaj sidlokoj kaj sidis tre kviete. La homoj returniĝis al siaj trinkaĵoj kaj sia interparolado, perceptante ke ilia estro dividis iun ŝercon kun la etaj gastoj, kaj tio finiĝis.

— Nu, Frodo, finfine ni komprenas unu la alian, — diris Faramiro. — Se vi ŝarĝis vin per tiu ĉi afero, nevolonte, laŭ peto de aliuloj, vi ricevas de mi kompaton kaj honoron. Kaj mi miras pri vi: vi tenis ĝin kaŝita kaj ne uzis ĝin. Vi estas popolo nova, kaj mondo nova al mi. Ĉu ĉiuj viaj parencoj estas similaj? Via lando devas esti regno de paco kaj kontento, kaj devas esti tie kultivistoj alte estimataj.

— Ne ĉio bonstatas tie, — diris Frodo, — sed certe kultivistoj estas estimataj.

— Sed personoj tie devas laciĝi, eĉ en siaj ĝardenoj, kio okazas al ĉio sub la suno de tiu ĉi mondo. Kaj vi estas malproksimaj de l' hejmo kaj lacaj pro vojaĝo. Ne plu hodiaŭ vespere. Dormu ambaŭ pace, se vi povos. Ne timu! Mi ne volas vidi ĝin, nek tuŝi ĝin, nek scii pli pri ĝi ol mi jam scias (kio estas sufiĉe), por ke la danĝero ne embusku min kaj mi malpli sukcesu en la ekzameno ol Frodo, filo de Drogo. Iru nun ripozi, sed unue dira al mi, se vi volas, kien vi deziras iri, kaj kion fari. Ĉar mi devas vaĉi, kaj atendi, kaj pensadi. La tempo pasas. Matene ĉiu el ni devos iri rapide laŭ la vojoj destinitaj por ni.

Frodo pli frue sentis sin tremadi kiam la unua ŝoko de timo forpasis. Nun granda laco inundis lin kvazaŭ nubo. Ne plu li povis hipokriti kaj rezisti.

— Mi estis trovonta vojon en Mordoron, — li diris feble. — Mi estis ironta al Gorgoroto. Mi devas trovi la Monton de Fajro kaj enĵeti la aĵon en la Fendaĵon de l' Destino. Gandalfo diris tion. Mi ne opinias, ke mi iam alvenos tien.

Faramiro fiksrigardis lin momente en seriozmiena miro, Tiam subite li brakumis lin, dum li pendolis, kaj levante lin malabrupte portis lin al la lito kaj kuŝigis lin tien, kaj kovris lin varmige. Tuj li profunde endormiĝis.

Alian liton oni metis apude por lia servisto. Sam hezitis momente, poste kun profunda riverenco diris:

— Bonan nokton, moŝta militestro. La okazon vi utiligis, sinjoro.

— Ĉu vere? — diris Faramiro.

— Jes, sinjoro, kaj montris vian kvaliton: la plej altan. Faramiro ridetis.

— Servisto impertinenta, mastro Samsaĝo. Tamen ne: laŭdo fare de laŭdindulo superas ĉiujn rekompencojn. Tamen en tio ĉi estas nenio laŭdinda. Nenio min logis aŭ tentis fari ion alian ol la faritaĵon.

— Aĥ bone, sinjoro, — diris Sam, — vi diras, ke mia mastro havas mienon elfecan; kaj tio estas bona kaj vera. Sed tion ĉi mi povas diri: ankaŭ vi havas mienon, sinjoro, kiu memorigas min pri, pri... nu, Gandalfo, pri sorĉistoj.

— Eble, — diris Faramiro. — Eble vi rimarkas de malproksime la mienon de Numenoro. Bonan nokton!

6

La malpermesita lageto

Frodo vekiĝante trovis Faramiron kliniĝanta al li. Dum sekundo lin kaptis malnovaj timoj kaj li sidiĝis kaj forkaŭris.

— Nenio estas por timi, — diris Faramiro.

— Ĉu jam matene? — demandis Frodo oscedante.

— Ankoraŭ ne, sed la nokto preskaŭ finiĝis kaj la plena luno subeniras. Ĉu vi volas veni por vidi ĝin? Cetere estas afero, pri kiu mi deziras vian konsilon. Mi bedaŭras veki vin el dormo, sed ĉu vi volas veni?

— Mi venos, — diris Frodo, stariĝante kaj iom tremetante, kiam li forlasis la varman lantukon kaj felojn. Ŝajnis malvarme en la senfajra kaverno. La bruo de l' akvo laŭtis en la kvieto. Li surmetis sian mantelon kaj sekvis Faramiron.

Sam, vekiĝinte subite pro ia gardema instinkto, vidis unue la malplenan liton de sia mastro kaj salte leviĝis. Poste li vidis du malhelajn figurojn de Frodo kaj iu homo, kadrita de l' arkaĵo, kiun jam plenigis pala blanka lumo. Li rapide sekvis ilin, preter vicoj de homoj dormantaj sur matracoj laŭlonge de la muro.

Kiam li pasis la kavernan enirejon, li vidis, ke la Kurteno nun estis blindiga vualo el silko, perloj kaj arĝentaj fadenoj: degelantaj lunlumaj glacieroj. Sed li ne paŭzis por admiri ĝin, kaj turniĝante flanken li sekvis sian mastron tra la mallarĝa pordo en la muro de l' kaverno.

Ili trairis unue nigran koridoron, poste supren laŭ multaj malsekaj ŝtupoj, kaj tiel alvenis etan platan interetaĝon, tranĉitan en la ŝtono kaj lumigitan de la pala ĉielo, ekbrilanta alte supre tra longa profunda ŝakto. De tie kondukis du ŝtuparoj: unu pluiranta, ŝajne, supren al la alta bordo de la fluo; la alia devianta maldekstren. Tiun ili laŭiris. Ĝi serpentumis supren kvazaŭ turŝtuparo.

Fine ili elvenis el la ŝtona mallumo kaj ĉirkaŭrigardis. Ili troviĝis sur larĝa plata roko sen barilo aŭ palisaro. Dekstre, oriente, falis la torento, plaŭdante trans multajn terasojn, kaj poste, verŝiĝante malsupren laŭ kruta fluejo, ĝi plenigis glate hakitan kanelon per malhela akvopotenco ŝaŭmflokita, kaj kirliĝante kaj hastante preskaŭ ĉe iliaj piedoj ĝi plonĝis vertikale trans la randon, kiu gapis maldekstre. Tie proksime al la rando, staris homo silenta, fiksrigardante malsupren.

Frodo sin turnis por rigardi la glatajn fluojn de la akvo, dum ili kurbiĝis

kaj plonĝis. Poste li levis la okulojn kaj rigardis foren. La mondo estis kvieta kaj malvarma, kvazaŭ tagiĝo proksimiĝus. Fore en la okcidento la plenluno sinkis, ronda kaj blanka. Palaj nebuletoj tremetadis en la valego sube: larĝa golfo de arĝenta fumo, sub kiu ruliĝis la friskaj noktaj akvoj de Anduino. Nigra mallumo baŭmis pretere, en kiu ekbrilis jen kaj jen malvarmaj, akraj, forestaj, blankaj kiel dentoj de fantomoj, la montpintoj de Eredo Nimrajs, la Blankaj Montoj de la regno Gondoro, kronitaj je ĉiamdaŭra neĝo.

Dum kelka tempo Frodo staris tie sur la alta ŝtonplato, kaj trakuris lin tremego kiam li scivolis, ĉu ie en la vasto de l' noktterenoj promenas aŭ dormas liaj iamaj kunuloj, aŭ ili kuŝas mortaj, volvite en nebulo. Kial oni kondukis lin ĉi tien el forgesplena dormo?

Sam avidis respondon al tiu sama demando kaj ne povis bridi murmuron, sole al la orelo de la mastro, dum li pensis:

— Bela perspektivo sendube, sinjoro Frodo, sed tuŝas malvarme la koron, por ne paroli pri la ostoj! Kio okazas?

Faramiro aŭdis kaj respondis.

— Lunsubiĝo super Gondoro. Bela luno *Ithil*, forirante el Mez-Tero, ekrigardas la blankajn buklojn de malnova Mindoluino. Tio valoras kelkajn frostotremetojn. Sed mi venigis vin ne por vidi tion, kvankam viavice, Samsaĝo, mi vin ne venigis, kaj vi nur pagas la prezon de via vaĉemo. Tion rebonigos gluto da vino. Venu, rigardu jam!

Li alpaŝis la silentan sentinelon ĉe la malhela eĝo, kaj Frodo sekvis. Sam ne antaŭeniris. Li jam sentis sin sufiĉe nesekura sur tiu alta malseka plataĵo. Faramiro kaj Frodo rigardis malsupren. Fore sube ili vidis la blankan akvon enverŝiĝi en ŝaŭmantan pelvegon, kaj poste kirliĝi malhele ĉirkaŭ profunda ovala baseno en la rokoj, ĝis ĝi denove trovis elirejon tra mallarĝa truo kaj forfluis, fumante kaj babile, al pli trankvilaj kaj pli ebenaj etendaĵoj. La lunlumo ankoraŭ deklivis suben al la falfinaĵo kaj ekbrilis sur la ondetoj en la baseno. Baldaŭ Frodo konsciiĝis pri eta malhela io sur la pli proksima bordo, sed ĝuste kiam li alrigardis ĝin, ĝi enplonĝis kaj malaperis tuj preter la bolado kaj bobelado de l' akvofalo, fendante la nigran akvon tiel nete kiel sago aŭ ŝtonego.

Faramiro turniĝis al la apuda homo.

— Nu, kio laŭ via opinio estas tio, Anborno? Ĉu sciuro aŭ alciono? Ĉu estas nigraj alcionoj en la noktaj lagetoj de Mornarbaro?

— Birdo ĝi ne estas, kiel ajn, — respondis Anborno. — Ĝi havas kvar membrojn kaj plonĝas homsimile; belan majstrecon de la metio ĝi vidigas, cetere. Kion ĝi celas? Ĉu serĉas vojon supren malantaŭ la Kurteno al nia kaŝejo? Ŝajnas, ke finfine ni estas malkaŝitaj. Mi havas mian pafarkon, kaj

mi postenigis aliajn arkpafistojn, preskaŭ tiel celtrafajn kiel mi, sur ambaŭ bordoj. Por pafi mi atendas nur vian ordonon, estro.

— ĉu ni pafu? — demandis Faramiro, rapide sin turnante al Frodo.

Frodo momente ne respondis.

— Ne! — li diris poste. — Ne! Mi petas, ke vi ne pafu!

Se aŭdacus Sam, li dirus "jes", pli rapide kaj pli laŭte. Li ne povis vidi, sed li divenis sufiĉe bone laŭ iliaj vortoj, kion ili rigardas.

— Vi scias do, kio estas tiu estaĵo, ĉu? — diris Faramiro. — Mi petas, nun kiam vi vidis, diru al mi, kial ĝi estu indulgita. Dum ĉiuj niaj interparoloj vi eĉ unufoje ne priparolis vian malrespektindan kunulon, kaj mi rezignis provizore. Oni povis atendi ĝis li estos kaptita kaj kondukita antaŭ min. Mi sendis miajn plej bonajn ĉasistojn por serĉi lin, sed li evitis ilin, kaj ili ne ekvidis lin ĝis nun, krom jen Anborno, unufoje en la krepusko hieraŭ. Sed nun li pli mise trudiĝis ol dum kunikloĉasado en la suprejo: li aŭdacis veni al Heneto Anun, kaj lia vivo estas perdita. Mi miras pri tiu kreaĵo: tiel sekretema kaj ruza, li tamen venis sin amuzi en la lageto antaŭ mia fenestro mem. Ĉu li supozas, ke la homoj dormas sensentinele la tutan nokton? Kial do?

— Ekzistas du respondoj, ŝajnas al mi, — diris Frodo. — Unue, li scias malmulton pri la homoj, kaj kvankam li estas ruza, via rifuĝejo estas tiel kaŝita, ke eble li ne scias, ke tie kaŝiĝas homoj. Aliflanke, mi opinias, ke lin logas deziro superpotenca, pli forta ol lia singardemo.

— Li estas logata, vi diras? — diris Faramiro mallaŭte. — Ĉu eble li, ĉu do li scias pri via ŝarĝo?

— Efektive jes. Li mem portis ĝin dum multaj jaroj.

— Portis ĝin *li*? — diris Faramiro, spasme spirante pro miro. — Tiu ĉi afero volvas sin ĉiam en novaj enigmoj. Do li persekutas ĝin, ĉu?

— Eble. Ĝi estas trezorego por li. Sed ne pri tio mi parolis.

— Do kion serĉas la kreaĵo?

— Fiŝojn, — diris Frodo. — Vidu!

Ili rigardadis suben al la malhela lageto. Nigra kapeto aperis ĉe la malproksima ekstremo de la baseno, tuj ekster la profunda ombro de la rokoj. Vidiĝis momenta arĝenta ekbrilo kaj kirliĝo de ondetoj. Ĝi naĝis al la bordo, kaj tiam mirinde vigle figuro ransimila grimpis el la akvo sur la bordon. Tuj ĝi sidiĝis kaj komencis maĉi la etan arĝentaĵon, kiu ekbrilis turnate: la lastaj radioj de la luno nun trafis malantaŭ la ŝtonmuro ĉe la lageta ekstremo.

— Fiŝojn! — Faramiro ridis mallaŭte. — Tio estas malpli danĝera malsato. Aŭ eble ne: fiŝoj el la lageto de Heneto Anun eble kostos al li ĉion, kion li havas por doni.

— Nun li estas antaŭ mia sagopinto, — diris Anborno. — Ĉu mi pafu aŭ ne, estro? Por seninvita alveno al tiu ĉi loko nia leĝo postulas morton.

— Atendu, Anborno, — diris Faramiro. — Tiu ĉi estas afero pli malfacila ol ĝi ŝajnas. Kion vi volas nun diri, Frodo? Kial mi indulgu?

— La kreaĵo estas mizera kaj malsata, — diris Frodo, — kaj ne konscias sian danĝeron. Kaj Gandalfo, via Mitrandiro, ordonus pro tiu kialo kaj aliaj, ke vi ne mortigu lin. Li malpermesis, ke la elfoj tion faru. Mi ne scias klare kial, kaj pri tio, kion mi konjektas, mi ne povas paroli malkaŝe ĉi tie ekstere. Sed tiu kreaĵo estas iel ligita al mia komisio. Ĝis vi trovis kaj kondukis nin, li estis mia gvidanto.

— Ĉu via gvidanto! La afero iĝas ĉiam pli stranga. Por vi mi farus multon, Frodo, sed tion ĉi mi ne povas cedi: lasi tiun ruzan vagulon iri libere kaj propravole de ĉi tie, por aliĝi al vi poste se tio plaĉos al li, aŭ kaptiĝi de orkoj kaj deklari ĉion, kion li scias, minacate de doloro. Li devas esti mortigita aŭ kaptita. Mortigita, se li ne estos kaptita tre rapide. Sed kiel oni povas kapti tiun glitemulon multmisforman, krom per plumohava stangeto.

— Permesu, ke mi subeniru kviete al li, — diris Frodo. — Vi rajtos teni streĉitaj viajn pafarkojn kaj pafi almenaŭ min, se mi malsukcesos. Mi ne forkuros.

— Iru do kaj rapidu! — diris Faramiro. — Se li travivos, li devos esti via fidela servisto dum la restaĵo de siaj malfeliĉaj tagoj. Konduku Frodon suben al la bordo, Anborno, kaj iru singarde. Tiu kreaĵo posedas nazon kaj orelojn. Vian pafarkon donu al mi.

Anborno gruntis kaj gvidis suben laŭ la serpentuma ŝtuparo ĝis la interetaĝo, kaj poste supren laŭ la alia ŝtuparo, ĝis fine ili alvenis mallarĝan aperturon kovritan per densaj arbustoj. Silente trapasinte, Frodo trovis sin supre de la suda bordo super la lageto. Jam estis mallume, kaj la akvofalo estis pala kaj griza, spegulante nur la daŭrantan lunlumon de l' okcidenta ĉielo. Li ne povis vidi Golumon. Li iom pluiris kaj Anborno alvenis mallaŭte post li.

— Antaŭen! — li spiris en la orelon de Frodo. — Atentu vian dekstron. Se vi falos en la lageton, neniu krom via fiŝkaptanta amiko povos helpi vin. Kaj ne forgesu, ke pafarkistoj estas en proksimo, kvankam vi eble ne vidas ilin.

Frodo ŝteliris antaŭen, uzante siajn manojn golumece por palpi la vojon kaj stabiligi sin. La rokoj estis plejparte ebenaj kaj glataj, sed glitfaligaj. Li haltis aŭskultante. Komence li aŭdis neniun sonon krom la senĉesa hastado de la akvofalo malantaŭe. Tamen baldaŭ li aŭdis, ne malproksime antaŭe, siblan murmuradon.

— Fiŝŝoj, agrablaj fiŝŝoj. Blanka Vizaĝo malaperis, mia trezoro, finfine, jes. Nun ni povos manĝi fiŝojn trankvile. Ne, ne trankvile, trezoro. Ĉar perdita estas la trezoro, jes, perdita. Fiaj hobitoj, aĉaj hobitoj. Foriris forlasinte nin, *golum'*; kaj la trezoro estas foririnta. Nur kompatinda Smeagolo tute sola. Neniu trezoro. Aĉaj homoj, ili prenos ĝin, ŝtelos mian trezoron. Ŝtelistoj. Ni malamas ilin. Fiŝŝoj, agrablaj fiŝŝoj. Fortigas nin. L' okulojn briligas, la fingrojn firmigas, jess. Sufoku ilin, trezoro. Sufoku ĉiujn, jes, se ni havos okazojn. Agrablaj fiŝŝoj. Agrablaj fiŝŝoj!

Tiel daŭris plu, preskaŭ tiel senĉese kiel la akvofalo, interrompita nur de mallaŭta bruo de bavado kaj gargarado. Frodo ektremis, aŭskultante kompate kaj abomene. Li volis, ke ĝi silentiĝu, kaj ke li neniam plu devos aŭdi denove tiun voĉon. Anborno ne tre foris post li. Li povus rerampi kaj peti lin pafigi la ĉasistojn. Ili povus verŝajne sufiĉe proksimiĝi, dum Golumo glutegas kaj malsingardas. Unusola rekta trafo, kaj Frodo por ĉiam liberiĝus de tiu mizera voĉo. Sed ne, Golumo jam havis rajton pri li. Servisto havas rajton ĉe la mastro pro servado, eĉ servado pro timo. Ili pereus en la Mortaj Marĉoj sen Golumo. Frodo sciis ankaŭ, iel, ke tion Gandalfo ne volus.

— Smeagolo! — li diris mallaŭte.

— Fiŝŝoj, agrablaj fiŝŝoj, — diris la voĉo.

— Smeagolo! — li diris, iom pli laŭte. La voĉo silentiĝis.

— Smeagolo, la mastro venis serĉi vin. La mastro ĉeestas. Venu, Smeagolo! — Aŭdiĝis neniu respondo krom mallaŭta siblo, kvazaŭ de ensuĉata spiro.

— Venu, Smeagolo! — diris Frodo. — Ni troviĝas en danĝero.

Homoj mortigos vin, se ili trovos vin ĉi tie. Venu rapide, se vi volas eviti morton. Venu al la mastro!

— Ne! — diris la voĉo. — Ne afabla mastro. Lasis kompatindan Smeagolon kaj iras kun novaj amikoj. Mastro atendu. Smeagolo ankoraŭ ne finmanĝis.

— Mankas tempo, — diris Frodo. — Kunportu la fiŝon. Venu!

— Ne! Devas finmanĝi la fiŝon.

— Smeagolo! — diris Frodo urĝe. — La trezoro koleros. Mi prenos la trezoron, kaj mi diros: igu lin engluti la oston kaj sufokiĝi. Neniam plu gustumos fiŝon. Venu, la trezoro atendas!

Aŭdiĝis akra siblo. Baldaŭ el la mallumo venis Golumo rampanta kvarpiede, kvazaŭ erarinta hundo vokita apuden. En la buŝo li havis fiŝon duonmanĝitan kaj alian en la mano. Li venis proksimen al Frodo, preskaŭ naz-al-naze, kaj prisnufis lin. Liaj palaj okuloj brilis. Poste li prenis el la buŝo la fiŝon kaj stariĝis.

— Afabla mastro! — li flustris. — Afabla hobito, revenis al kompatinda Smeagolo. Bona Smeagolo venas. Jam ni iru, iru rapide, jes. Tra la arbaro, dum la Vizaĝoj malhelas. Jes, venu, ni iru!

— Jes, ni iros baldaŭ, — diris Frodo. — Sed ne tuj. Mi iros kun vi laŭ mia promeso. Mi ree promesas. Sed ne nun. Vi ankoraŭ ne sendanĝeras. Mi savos vin, sed vi devas fidi al mi.

— Ni devas fidi al la mastro, ĉu? — diris Golumo dubeme. — Kial? Kial ne iri tuj? Kie estas la alia, la kolera malĝentila hobito? Kie li estas?

— Tie supre, — diris Frodo, indikante la akvofalon. — Sen li ni ne foriros. Ni devas reiri al li. — Lia koro malĝojiĝis. Tio tro similis trompon. Li ne vere timis, ke Faramiro permesos mortigi Golumon, sed li probable igos lin kaptito kaj ligos lin; kaj certe tio, kion faris Frodo, ŝajnos perfido al la kompatinda perfidemulo. Estos verŝajne neeble komprenigi aŭ kredigi al li, ke Frodo savis lian vivon laŭ la sola ebla maniero. Kion alian li povus fari por esti lojala, tiel plene kiel eblas, al ambaŭ partioj. — Venu! — li diris. — Aŭ la trezoro koleros. Nun ni reiros, supren laŭ la fluo. Iru, iru, vi iru antaŭe!

Golumo antaŭen rampis apud la rando dum kelka tempeto, snufante kaj suspekteme. Baldaŭ li haltis kaj levis la kapon.

— Iu ĉeestas! Ne hobito. — Subite li retroturniĝis. Verda lumo flagris en liaj ŝvelaj okuloj. — Masstro, masstro! — li siblis. — Misa! Trompa! Falsa! — Li kraĉis kaj etendis siajn longajn brakojn kun blankaj klakantaj fingroj.

Tiumomente la granda nigra figuro de Anborno baŭmis post li kaj falis sur lin. Granda forta mano kaptis lian nukon kaj fikstenis lin. Li ĉirkaŭtordiĝis fulme, tute malseka kaj ŝlima, tordiĝante angilece, mordante kaj gratante kvazaŭ kato. Sed du pliaj homoj venis el la ombroj.

— Senmoviĝu! — diris unu. — Aŭ ni trapikos vin multpingle kiel erinaco. Senmoviĝu!

Golumo malrigidiĝis kaj komencis kriĉi kaj plori. Ili ligis lin, ne tre malsovaĝe.

— Malkrude, malkrude! — diris Frodo. — Li ne havas forton por egali vin. Ne dolorigu lin, se vi povas tion eviti. Li pli kvietos tiakondiĉe. Smeagolo! Ili ne dolorigos vin. Mi akompanos vin, kaj neniu difekto trafos vin. Krom se ankaŭ min oni mortigos. Fidu la mastron.

Golumo turniĝis kaj kraĉis al li. La homoj levis lin, kovris liajn okulojn per kapuĉo kaj forportis lin.

Frodo sekvis ilin, sentante sin tre malfeliĉa. Ili trairis la aperturon malantaŭ la arbustoj, kaj reen, malsupren laŭ la ŝtuparoj kaj koridoroj, en la kavernon. Du-tri torĉoj estis fajrigitaj. Viroj ekmoviĝis, Sam estis tie, kaj li

direktis strangan rigardon al la malrigida bulaĵo, kiun portis la homoj.

— Ĉu kaptis lin? — li diris al Frodo.

— Jes. Nu ne, mi ne kaptis lin. Li venis al mi, ĉar komence li fidis min, mi timas. Mi ne volis lin ligita tiamaniere. Mi esperas, ke estos en ordo; sed mi malamas la tutan aferon.

— Ankaŭ mi, — diris Sam. — Kaj nenio estos iam en ordo, kie troviĝas tiu peco da mizero.

Venis homo kaj fingrovokis la hobitojn kaj kondukis ilin al la alkovo en la fundo de l' kaverno. Faramiro sidis tie sur sia seĝo, kaj la lampo estis relumigita en la niĉo super lia kapo. Li mansignis, ke ili sidiĝu sur la taburetoj apud li.

— Alportu vinon por la gastoj, — li diris. — Kaj konduku al mi la kaptiton.

La vino estis alportita, kaj poste Anborno venis portante Golumon. Li forigis la kovrilon de l' kapo de Golumo kaj starigis lin surpiede, starante malantaŭ li por subteni lin. Golumo palpebrumis, kaŝante la malicon en siaj okuloj per ties pezaj palaj palpebroj. Kiel tre mizera kreaĵo li aspektis, gutanta kaj humidaĉa, odorante je fiŝoj (li ankoraŭ tenis fiŝon en la mano); liaj maldensaj bukloj pendis kvazaŭ fetoraj fiherboj sur la osteca brovo, lia mano mukis.

— Malligu nin! Malligu nin! — li diris. — La ŝnuro dolorigas nin, jes, dolorigas, jes dolorigas nin, kaj ni faris nenion.

— Ĉu nenion? — diris Faramiro, rigardante la mizerulon kun akra gvatemo, sed sen vizaĝesprimo, ĉu kolera, ĉu kompata, ĉu miranta. — Ĉu nenion? Ĉu vi neniam faris ion meritantan ligadon aŭ pli severan punon? Tamen ne mi tion devas prijuĝi, feliĉe. Sed hodiaŭ nokte vi venis tien, kie alveno meritas morton. La fiŝoj en tiu lageto estas aĉetataj multekoste.

Golumo lasis fali el la mano la fiŝon.

— Ne volas fiŝon, — li diris.

— La prezo ne rilatas al la fiŝo. Nur alveni ĉi tien kaj rigardi la lageton meritas mortpunon. Mi indulgis vin ĝis nun pro la peto de tiu ĉi Frodo, kiu diras, ke almenaŭ de li vi meritas iom da danko. Sed ankaŭ min vi devas kontentigi. Kiel vi nomiĝas? De kie vi venis? kaj kien vi iros? Kio estas via afero?

— Ni estas perditaj, perditaj, — diris Golumo. — Neniu nomo, neniu afero, neniu Trezoro, nenio. Nur malpleno. Nur malsato; jes, ni malsatas. Kelkaj fiŝetoj, aĉaj ostecaj fiŝetoj, por kompatindulo, kaj oni diras morton. Tiom saĝaj ili estas, tiom justaj, tiom justegaj.

— Ne tre saĝaj, — diris Faramiro. — Sed justaj: jes eble, tiel justaj kiel permesas nia malgranda saĝo. Malligu lin, Frodo!

Faramiro prenis el sia zono trançileton kaj transdonis ĝin al Frodo. Golumo, miskompreninte la geston, kriĉis kaj falis.

— Nun, Smeagolo! — diris Frodo. — Vi devas fidi al mi. Mi ne forlasos vin. Respondu verece, se vi kapablas. Tio kaŭzos al vi bonon, ne malbonon. — Li tranĉis la ŝnurojn sur la manradikoj kaj maleoloj de Golumo kaj restarigis lin.

— Venu ĉi tien! — diris Faramiro. — Rigardu min! Ĉu vi konas la nomon de tiu ĉi loko? Ĉu vi estis ĉi tie antaŭe?

Malrapide Golumo levis siajn okulojn kaj malvolonte rigardis tiujn de Faramiro. La tuta lumo forlasis ilin, kaj ili rigardis morne kaj pale dum momento la klarajn senŝancelajn okulojn de la gondorano. Sekvis senmova silento. Tiam Golumo mallevis sian kapon kaj ŝrumpis suben, ĝis li kaŭris sur la planko, tremante.

— Ni ne scias, kaj ni ne deziras scii, — li plorkriis. — Neniam venis ĉi tien, neniam denove venos.

— En via menso estas ŝlositaj pordoj kaj fermitaj fenestroj, kaj malantaŭ ili mallumaj ĉambroj, — diris Faramiro. — Sed pri tio ĉi mi juĝas, ke vi diras veron. Tio bone servas vin. Kian ĵuron vi ĵuros, ke vi neniam revenos; kaj neniam gvidos iun ajn vivanton ĉi tien per vortoj aŭ signoj?

— La mastro scias, — diris Golumo flanken rigardante al Frodo. — Jes, li scias. Ni promesos al la mastro, se li savos nin. Ni promesos al Ĝi, jes. — Li rampis ĝis la piedoj de Frodo kaj plorĝemis. — Savu min, afabla mastro! Smeagolo promesas al la Trezoro, promesas fidinde. Neniam venos denove, neniam parolos, ne, neniam!

— Ĉu vi estas kontenta? — diris Faramiro.

— Jes, — diris Frodo. — Nome, vi devos aŭ akcepti tiun promeson aŭ plenumi vian leĝon. Nenion pli vi ricevos. Sed mi promesis, ke se li venus al mi, li ne estus difektita. Kaj mi ne volus pruviĝi nefidinda.

Faramiro sidis momente pensante.

— Bone, — li diris fine. — Mi cedas vin al via mastro, al Frodo, filo de Drogo. Li deklaru, kion li faros pri vi!

— Sed, mastro Faramiro, — diris Frodo riverencante, — vi ankoraŭ ne deklaris vian intencon rilate al la nomita Frodo, kaj ĝis tio estos konata, li ne povos formi siajn planojn por si aŭ siaj kunuloj. Via juĝo estis prokrastita ĝis la mateno, sed tiu jam aktualas.

— Do mi deklaros mian juĝon, — diris Faramiro. — Rilate vin, Frodo, tiomgrade kiom mi rajtas sub aŭtoritato pli alta, mi deklaras vin libera en la regno de Gondoro ĝis la plej fora el ĝiaj antikvaj limoj; escepte nur ke nek vi nek iu ajn via akompananto havas permeson veni al tiu ĉi loko neinvitite. Tiu ĉi juĝo daŭros dum unu jaro plus unu tago, kaj tiam ĉesos, krom se

antaŭ tiu limdato vi venos al Minaso Tirit kaj prezentos vin al la Mastro kaj Reganto de la Urbo. Tiam mi petos lin konfirmi tion, kion mi faris, kaj igi ĝin tutviva. Dume, iu ajn, kiun vi protektas, estos mia protektato kaj sub la ŝildo de Gondoro. Ĉu al vi estas respondite?

Frodo profunde riverencis.

— Al mi estas respondite, kaj mi deklaras min preta vin servi, se tio iel valoras al iu tiel alta kaj honorinda.

— Ĝi multe valoras, — diris Faramiro. — Kaj nun, ĉu vi prenas tiun ulon, tiun Smeagolon, sub vian protekton?

— Mi jes prenas Smeagolon sub mian protekton, — diris Frodo. Sam suspiris aŭdeble; kaj ne pro la ĝentilaĵoj, kiujn li, samkiel iu ajn hobito, tute aprobis. Efektive, en la Provinco tia afero postulus multe pli da vortoj kaj riverencoj.

— Do mi diras al vi, — diris Faramiro, sin turnante al Golumo, — vi estas mortkondamnita; sed dum vi akompanas Frodon vi estas eksterdanĝera rilate nin. Tamen se iam vi estos trovita de ajna homo el Gondoro vaganta sen li, la kondamno eble efektiviĝos. Kaj morto trovu vin rapide, ĉu en ĉu ekster Gondoro, se vi ne servos lin bone. Nun respondu al mi: kien vi volas iri? Li diras, ke vi estis lia gvidanto. Kien vi gvidis lin?

Golumo ne respondis.

— Pri tio mi ne permesas sekretecon, — diris Faramiro. — Respondu, aŭ mi ŝanĝos mian verdikton!

Golumo daŭre silentis.

— Mi respondos anstataŭ li, — diris Frodo. — Li gvidis min ĝis la Nigra Pordego, laŭ mia peto; sed ĝi estis netrapasebla.

— Ne ekzistas aperta pordo en la Sennoman Landon, — diris Faramiro.

— Vidinte tion, ni turniĝis flanken kaj venis laŭ la suda vojo, — Frodo daŭrigis, — ĉar li diris, ke estas, aŭ eble estas, pado proksime al Minaso Itil.

— Minaso Morgul, — diris Faramiro.

— Mi ne scias precize, — diris Frodo; — sed la pado supreniras, laŭ mia opinio, en la montaron ĉe la norda flanko de tiu valo, en kiu staras la malnova urbo. Ĝi supreniras ĝis alta fendaĵo kaj poste suben ĝis... tio, kio estas pretere.

— Ĉu vi konas la nomon de tiu alta pasejo? — demandis Faramiro.

— Ne, — diris Frodo.

— Ĝi nomiĝas Cirito Ungol. — Golumo siblis akre kaj komencis murmuri al si. — Ĉu ne tiel ĝi nomiĝas? — diris Faramiro, sin turnante al li.

— Ne! — diris Golumo, kaj poste li kriĉis, kvazaŭ io pikus lin. — Jes, jes, ni aŭdis unufoje tiun nomon. Sed kiel gravas al ni la nomo? La mastro diras, ke li devas eniri. Do ni devas provi alian vojon. Ne ekzistas alia

provebla vojo, ne.

— Ĉu neniu alia vojo? — diris Faramiro. — Kiel vi scias tion? Kaj kiu esploris la tuton de tiu malhela regno? — Li rigardis longe kaj penseme Golumon. Baldaŭ li parolis denove. — Forkonduku tiun ĉi kreaĵon, Anborno. Traktu lin milde, sed atentu lin. Kaj vi, Smeagolo, ne provu plonĝi en la akvofalon. Tie la rokoj havas tiajn dentojn, kiaj mortigos vin antaŭtempe. Jam lasu nin kaj kunprenu vian fiŝon.

Anborno eliris, kaj Golumo iris antaŭ li kuntiriĝante. La kurtenon oni tiris trans la alkovon.

— Frodo, ŝajnas al mi, ke vi agas tre malprudente en tio ĉi, — diris Faramiro. — Mi opinias, ke vi ne iru kun tiu kreaĵo. Ĝi estas misega.

— Ne, ne komplete misega, — diris Frodo.

— Eble ne tute, — diris Faramiro, — sed malico mordas ĝin kancere, kaj la miseco kreskas. Li gvidos vin al nenio bona. Se vi disiĝos de li, mi donos al li sendanĝeran vojon kaj gvidadon al iu ajn punkto ĉelime de Gondoro laŭ lia elekto.

— Li tion ne akceptos, — diris Frodo. — Li sekvos nin, kiel li jam longe faris. Kaj mi multfoje promesis protekti lin kaj iri tien, kien li gvidos. Vi ne petos min agi pri li kontraŭpromese, ĉu?

— Ne, — diris Faramiro. — Sed tion petus mia koro. Ĉar ŝajnas malpli malbone konsili al alia persono perfidi sian vorton ol tion fari mem, precipe se oni vidas amikon celanta al propra misfortuno. Sed ne, se li insistas iri kun vi, vi devos jam toleri lin. Sed ŝajnas al mi, ke vi ne estas devigita iri al Cirito Ungol, pri kiu li rakontis al vi malpli, ol li scias. Tion mi klare perceptis en lia menso. Ne iru al Cirito Ungol!

— Kien do mi iru? — demandis Frodo. — ĉu reen al la Nigra Pordego por transdoni min al la gardistaro? Kion vi scias kontraŭ tiu loko, kio igas ĝian nomon terura?

— Nenion certan, — diris Faramiro. — Ni en Gondoro neniam pasas orienten de la Vojo nuntempe, kaj neniu el ni, pli junaj homoj, iam ajn faris tion, kiel ankaŭ neniu el ni surpaŝis la Montojn de l' Ombro. Pri ili ni konas nur malnovajn raportojn kaj la onidirojn de l' antaŭa epoko. Sed iu malhela teruraĵo loĝas en la pasejoj super Minaso Morgul. Se Cirito Ungol estas nomata, maljunuloj kaj kleruloj paliĝas kaj silentiĝas. La valo de Minaso Morgul maliciĝis antaŭ tre longe, kaj ĝi jam estis minaco kaj timigo, kiam la forpelita Malamiko ankoraŭ loĝis malproksime, kaj Itilio estis ankoraŭ plejparte sub nia regado. Kiel vi scias, tiu urbo estis iam fortikaĵo, fiera kaj bela, Minaso Itil, ĝemelo de nia propra urbo. Sed ĝi estis kaptita de krueluloj, kiujn la Malamiko en sia freŝa forto dominis, kaj kiuj vagis senhejme kaj senmastre post lia malvenko. Oni diras, ke iliaj estroj estis

homoj el Numenoro, kiuj fariĝis malhele misfaraj; al ili la Malamiko donis potencringojn, kaj li voris ilin: vivaj fantomoj ili fariĝis, teruraj kaj malicegaj. Post lia foriro ili kaptis Minason Itil kaj ekloĝis tie, kaj ili plenigis ĝiri kaj la tutan ĉirkaŭan valon je putro: ĝi ŝajnis senhoma kaj ne estis tia, ĉar senforma timo estadis malantaŭ la ruinigitaj muroj. Naŭ princoj estis, kaj post la reveno de ilia mastro, kiun ili helpis kaj preparis sekrete, ili iĝis denove fortaj. Tiam la Naŭ Rajdantoj eliris el la pordego de hororo, kaj ni ne povis kontraŭstari ilin. Ne proksimiĝu al ilia citadelo. Oni rimarkos vin. Ĝi estas loko de sendorma malico, plena de senpalpebraj okuloj. Ne iru laŭ tiu vojo!

— Sed kien krome vi direktos min? — diris Frodo. — Vi mem ne povas, vi diras, gvidi min al la montoj, ankaŭ ne trans ilin. Sed trans la montojn mi celas, pro solena promeso al la Konsilio, por trovi vojon aŭ perei dumserĉe. Kaj se mi retroirus, rifuzante la vojon je la amara fino, kien do mi irus inter elfoj kaj homoj? Ĉu vi volas, ke mi venu al Gondoro kun tiu ĉi Aĵo, tiu Aĵo, kiu frenezigis vian fraton per deziro? Kian sorĉon ĝi plenumus en Minaso Tirit? Ĉu estu du urboj Minaso Morgul, rikanante unu la alian trans morta lando plena je putriĝo?

— Tion mi ne volas, — diris Faramiro.

— Do kion vi volas, ke mi faru?

— Mi ne scias. Tamen mi ne volas, ke vi iru al morto aŭ al turmentado. Kaj mi ne opinias, ke Mitrandiro elektus tiun vojon.

— Sed ĉar li jam foriris, mi devas sekvi tiajn vojojn, kiajn mi trovas. Kaj mankas tempo por longa serĉado, — diris Frodo.

— Dura sorto kaj senespera komisio, — diris Faramiro. — Sed almenaŭ memoru mian averton: gardu vin de tiu gvidonto, Smeagolo. Li antaŭe kulpis murdon. Tion mi legas en li. — Li ĝemspiris. — Nu, do ni renkontiĝis kaj disiĝos, Frodo, filo de Drogo. Al vi ne necesas molaj vortoj: mi ne esperas revidi vin je ajna alia tago sub tiu ĉi suno. Sed vi foriros kun mia beno al vi kaj al via tuta popolo. Ripozu iom, dum manĝaĵo estas preparata por vi. Mi volonte ekscius, kiel tiu rampa Smeagolo ekposedis tiun Aĵon, pri kiu ni parolas, kaj kiel li perdis ĝin, sed mi ne ĝenos vin nun. Se iam preterespere vi revenos al la landoj de l' vivantoj, kaj ni rerakontos niajn historiojn, sidante apud muro sub la suno, ridante pri malnovaj zorgoj, tiam vi rakontos al mi. Ĝis tiam, aŭ alia okazo ekster la vidkapablo de la Aŭgur-ŝtonoj de Numenoro, adiaŭ!

Li stariĝis kaj profunde riverencis al Frodo, kaj tirinte la kurtenon forpaŝis en la kavernon.

7

Vojaĝo al la Krucvojo

Frodo kaj Sam reiris al siaj litoj kaj kuŝis tie en silento ripozante dum iom da tempo, dum homoj ekaktivis kaj komenciĝis la aferoj de la tago. Post kelka tempo akvo estis alportita al ili, kaj poste oni kondukis ilin al tablo, sur kiu estis manĝaĵo por tri. Faramiro matenmanĝis kun ili. Li ne dormis depost la batalo de l' antaŭa tago, tamen li ne aspektis laca.

Finmanĝinte ili stariĝis.

— Ke neniu malsato ĝenu vin survoje, — diris Faramiro. — Vi havas malmultan provianton, sed mi ordonis, ke stoketon da nutraĵo konvena por vojaĝantoj oni metu en viajn tornistrojn. Ne mankos al vi akvo dum vi vojaĝos en Itilio, sed ne trinku el iu ajn rojo, kiu fluas de Imlado Morgul, la Valo de Dumviva Morto. Ankaŭ jenon mi devas diri al vi. Miaj skoltoj kaj vaĉantoj jam ĉiuj revenis, eĉ kelkaj kiuj ŝteliris al viddistanco de Moranono. Ĉiuj trovis strangaĵon. La tereno estas malplena. Nenio estas sur la vojo, kaj nenie aŭdiĝas bruo de piedoj, kornoj, aŭ pafarkaj ŝnuretoj. Atendema silento ŝvebas super la Sennoma Lando. Mi ne scias, kion tio aŭguras. Sed la tempo rapidas al iu granda konkludo. Ŝtormo venas. Rapidu, dum vi povas! Se vi estas pretaj, ni iru. La suno baldaŭ leviĝos super la ombraĵo.

La tornistroj de l' hobitoj estis alportitaj (iom pli pezaj ol antaŭe), kaj ankaŭ du fortaj bastonoj el polurita ligno, ferpintaj kaj kun ĉizitaj supraĵoj, tra kiuj estis treditaj plektitaj ledaj ŝnuroj.

— Mankas al mi taŭgaj donacoj por vi forirantaj, — diris Faramiro; — sed akceptu tiujn ĉi bastonojn. Ili eble servos al tiuj, kiuj marŝas aŭ grimpas en la sovaĝejo. La homoj de l' Blankaj Montoj uzas ilin; tamen ĉi tiuj estas mallongigitaj al via mezuro kaj estas nove ferpintitaj. Ili estas faritaj el la bela arbo *lebetrono*, amata de la lignometiistoj de Gondoro, kaj ili estas sorĉitaj por trovo kaj redono. Ke tiu sorĉo ne tute velku sub la Ombro, en kiun vi iros!

La hobitoj profunde riverencis.

— Plej bonkora gastiginto, — diris Frodo, — Duonelfo Elrondo diris al mi, ke survoje mi trovos amikecon, sekretan kaj neatenditan. Certe mi atendis nenioman amikecon tiom, kiom vi montris. Trovi ĝin ege rebonigas la mison.

Nun ili pretigis sin por foriro. Golumon oni kondukis el iu angulo aŭ kaŝejo, kaj li ŝajnis pli kontenta pri si ol li estis antaŭe, kvankam li restis

proksima al Frodo kaj evitis la rigardon de Faramiro.

— Via gvidisto devas esti blindumita, — diris Faramiro, — sed vin kaj vian serviston Samsaĝo mi liberigas de tio, se vi volas.

Golumo kriĉis, tordiĝis kaj kroĉiĝis al Frodo, kiam oni venis kovri liajn okulojn; kaj Frodo diris:

— Blindumu ĉiujn tri el ni, kaj kovru unuavice miajn okulojn, kaj tiam eble li konstatos, ke damaĝi ne estas la intenco.

Tion oni faris, kaj oni kondukis ilin el la kaverno de Heneto Anun. Trapasinte la koridorojn kaj ŝtuparojn ili sentis la friskan matenan aeron, freŝan kaj dolĉan, ĉirkaŭ si. Ankoraŭ blindumite ili pluiris dum kelka tempo, supren kaj poste malkrute suben. Fine la voĉo de Faramiro ordonis, ke ili estu malblindumitaj.

Ili staris denove sub la branĉoj de arbaro. Neniu bruo de la akvofalo estis aŭdebla, ĉar longa sudenira deklivo nun kuŝis inter ili kaj la ravineto, en kiu fluis la rojo. Okcidente ili vidis lumon trans la arboj, kvazaŭ la mondo tie finiĝus subite, ĉe rando elrigardanta nur al la ĉielo.

— Ĉi tie estas la lasta disiĝo de niaj vojoj, — diris Faramiro. — Se vi akceptos mian konsilon, vi ankoraŭ ne turniĝos orienten. Iru rekte antaŭen, ĉar tiel vi disponos dum multaj mejloj la kaŝon de la arbaro. Okcidente de vi estas rando, kie la tereno descendas en la grandajn valojn, jen subite kaj krute, jen laŭ longaj montflankoj. Restu proksime al tiu rando kaj la limoj de l' arbarego. Komence de via vojaĝo vi povos marŝi sub taglumo, laŭ mia opinio. La lando sonĝas en falsa paco, kaj provizore ĉio misa estas forigita. Fartu bone, dum tio eblas!

Li brakumis tiam la hobitojn, laŭ la maniero de sia popolo, kliniĝante kaj metante siajn manojn sur iliajn ŝultrojn kaj kisante iliajn fruntojn.

— Iru kun la bonvolo de ĉiuj bonuloj! — li diris.

Ili riverencis ĝis la tero. Poste li turnis sin kaj sen retrorigardi li forlasis ilin kaj iris al siaj du gardantoj, kiuj staris iomete for. Ili miris vidante kiel rapide jam moviĝis tiuj verde vestitaj homoj, malaperante preskaŭ en palpebruma daŭro. La arbaro tie, kie staris Faramiro, ŝajnis malplena kaj morna, kvazaŭ forpasus sonĝo.

Frodo suspiris kaj returniĝis suden. Kvazaŭ por signali sian malatenton pri tiaj ĝentilaĵoj, Golumo gratfosis en la humo sube de arbo. "Ĉu denove malsata? — pensis Sam. — Nu, jen ek denove!"

— Ĉu finfine ili foriris? — demandis Golumo. — Fiaj missfaraj homoj! La nuko de Smeagolo daŭre dolorigas lin, jes efektive. Ni iru!

— Jes, ni iru, — diris Frodo. — Sed se vi kapablas paroli nur mise pri tiuj, kiuj indulgis vin, prefere silentu!

— Afabla mastro! — diris Golumo. — Smeagolo nur ŝercis. Ĉiam

pardonas efektive, jes, jes, eĉ la truketojn de l’ afabla mastro. Ho jes, afabla mastro, afabla Smeagolo!

Frodo kaj Sam ne respondis. Surdorsiginte siajn tornistrojn kaj preninte siajn bastonojn, ili pluiris en la arbarojn de Itilio.

Tiutage ili dufoje ripozis kaj manĝis iomete el la nutraĵo provizita de Faramiro: sekigitaj fruktoj kaj salita viando, sufiĉe por multaj tagoj; kaj sufiĉe da pano por manĝo dum ĝi ankoraŭ freŝis. Golumo manĝis nenion.

La suno leviĝis kaj pasis supre nevidate, kaj komencis malsupreniri, kaj la lumo tra la arboj okcidente iĝis ora; kaj ĉiam ili marŝis en friska verda ombro, kaj ĉie ĉirkaŭ ili estis silento. Ĉiuj birdoj ŝajnis forflugintaj aŭ mutiĝintaj. Mallumo venis frue en la silenta arbaro, kaj antaŭ la noktiĝo ili haltis, lacaj, ĉar ili marŝis sep leŭgojn aŭ pli de Heneto Anun. Frodo kuŝiĝis kaj fordormis la nokton sur la profunda humo sub antikva arbo. Sam apud li estis malpli trankvila: li vekiĝis multfoje, sed neniam vidiĝis Golumo, kiu forŝteliĝis tuj, kiam la aliaj ekripozis. Ĉu li dormis izole en iu apuda truo, aŭ vagadis senripoze ŝtelire tra la nokto, tion li ne diris; sed li revenis ĉe la unua ekbrilo de taglumo, kaj vekis siajn kunulojn.

— Necesas stariĝi, jes necesas! — li diris. — Longdistanco ankoraŭ irenda, suden kaj orienten. La hobitoj devas rapidi!

Tiu tago pasis pli-malpli simile al la antaŭa tago, krom ke la silento ŝajnis pli profunda; la aero peziĝis, kaj komencis esti sufoke sub la arboj. Sentiĝis kvazaŭ tondro pretiĝus. Golumo ofte paŭzis, snufante la aeron, kaj poste li murmuradis al si kaj urĝis ilin pli rapidi.

Fine de la tria stadio de ilia taga marŝo, kiam la posttagmezo ekvelkis, la arbaro apertiĝis, kaj la arboj iĝis pli grandaj kaj pli disigitaj. Grandaj ileksoj kun ega ĉirkaŭmezuro staris malhelaj kaj solenaj en larĝaj maldensejoj, kun jen kaj jen inter ili fraksenoj aĝoblankaj, kaj gigantaj kverkoj ĝuste elpuŝantaj siajn brunverdajn sprosojn.

Ĉirkaŭ tiuj etendiĝis longaj gazonoj da verda herbo makulitaj je kelidonioj kaj anemonoj, blankaj kaj bluaj, nun falditaj por dormo; kaj estis akreoj plenplenaj je l’ folioj de arbaraj hiacintoj: jam ties glataj sonoriltigoj trapuŝis sin tra la humo. Neniu vivanto, ĉu besta ĉu birda, estis videbla, sed en tiuj apertaj lokoj Golumo ektimis, kaj ili marŝis nun singarde, hastante de unu longa ombro al alia.

La lumo rapide velkis, kiam ili alvenis la arbarofinon. Tie ili sidiĝis sub maljuna tuberoza kverko, kiu sendis siajn radikojn tordiĝantajn kiel serpentoj suben laŭ diseriĝa teramaso. Antaŭ ili kuŝis profunda malklara valo. Aliflanke la arbaro denove densiĝis, blua kaj griza sub la malvigla vespero, kaj marŝis plu suden. Dekstre ardis la Montoj de Gondoro, forege en la okcidento, sub fajrmakula ĉielo. Maldekstre kuŝis mallumo: la altegaj

muroj de Mordoro; kaj el tiu mallumo venis la longa valo, subiranta laŭ fendaĵo ĉiam pli larĝa al Anduino. Ĉe ties fundo fluis hasta rivereto: Frodo povis aŭdi ties ŝtonozan voĉon supreniĝanta tra l' silento; kaj apude sur la proksima flanko, vojo serpentumis suben kvazaŭ pala rubando, malsupren al malvarmaj grizaj nebuletoj, kiujn tuŝis neniu ekbrilo de sunsubiro. Tie ŝajnis al Frodo, ke li vidas malproksime, flosantaj kvazaŭ sur ombreca maro, la altajn malklarajn pintojn kaj rompitajn pinaklojn de malnovaj turoj forlasitaj kaj malhelaj.

Li turniĝis al Golumo.

— Ĉu vi scias, kie ni estas?

— Jes, mastro. Lokoj danĝeraj. Tio estas la vojo de la Turego de la Luno, mastro, malsupren ĝis la ruiniĝinta urbo sur la bordoj de l' rivero. La ruiniĝinta urbo, jes, loko tre fia, plena de malamikoj. Ni devis ne akcepti la konsilon de la homoj. La hobitoj deviis longe de l' ĝusta vojo. Necesas iri jam orienten, tien supre. — Li gestis per sia maldikega brako al la malhelaj montoj. — Kaj ni ne povas uzi ĉi tiun vojon. Ho ne! Krueluloj venas ĉi-voje, suben de la Turego.

Frodo rigardis malsupren al la vojo. Ĉiuokaze nenio moviĝis sur ĝi nuntempe. Ĝi aspektis soleca kaj forlasita, fluanta suben al la malplenaj ruinaĵoj en la nebuleto. Sed en la aero estis sento malica, kvazaŭ efektive tien-reen pasus aĵoj, kiujn okuloj ne povas vidi. Frodo ektremegis ree rigardante al la foraj pinakloj, jam malaperantaj en la nokton, kaj la bruo de la akvo ŝajnis malvarma kaj kruela: la voĉo de Morgulduino, la poluita rojo, kiu fluis el la Valo de la Fantomoj.

— Kion ni faru? — li diris. — Ni marŝis longe kaj diste. Ĉu ni serĉu iun lokon en la arbaro, kie ni povos kuŝi kaŝite?

— Ne valoras kaŝiĝi en la mallumo, — diris Golumo. — Ĝuste tage la hobitoj devos kaŝiĝi, jes tage.

— Ho ne! — diris Sam. — Ni devas ripozi iomete, eĉ se ni leviĝos ree meznokte. Tiam restos ankoraŭ horoj da mallumo, sufiĉe da tempo por ke vi konduku nin dum longa marŝo, se vi konas la vojon.

Golumo malvolonte konsentis, kaj li returniĝis al la arboj, celante orienten dum kelka tempo laŭlonge de la ĉifonaj arbarorandoj. Li rifuzis ripozi sur la tero tiel proksime al la malica vojo, kaj post kelka debato ili ĉiuj grimpis al la disbranĉiĝo de granda verda kverko, kies dikaj branĉoj kune saltantaj de la trunko liveris konvenan kaŝlokon kaj sufiĉe komfortan rifuĝejon. Noktiĝis kaj fariĝis tute senlume sub la baldakeno de la arbo. Frodo kaj Sam trinkis iomete da akvo kaj manĝis iom da pano kaj sekigitaj fruktoj, sed Golumo tuj kuntiriĝis kaj ekdormis. La hobitoj ne fermis siajn okulojn.

Verŝajne estis iom post la noktomezo, kiam Golumo vekiĝis: ili subite konsciiĝis pri liaj palaj okuloj senpalpebre brilantaj al ili. Li aŭskultis kaj snufis, kio ŝajnis, kiel ili pli frue konstatis, lia kutima metodo malkovri la horon de la nokto.

— Ĉu ni ripozis? Ĉu ni bele dormis? — li diris. — Ni iru!

— Nek tio, kaj nek alio, — graŭlis Sam. — Sed ni iros se necese. Golumo tuj desaltis de la arbobranĉoj kvarpieden, kaj la hobitoj sekvis pli malrapide.

Tuj kiam ili descendis, ili ree pluiris gvidate de Golumo, orienten, supren laŭ la malhela dekliva tereno. Malmulton ili povis vidi, ĉar la nokto estis nun tiel profunda, ke ili apenaŭ konsciis pri la tigoj de l' arboj antaŭ ol stumbli kontraŭ ilin. La tero iĝis pli malglata kaj marŝado estis pli malfacila, sed Golumo ŝajnis neniel ĝenata. Li kondukis ilin tra densejoj kaj rubusdezertoj; foje ĉirkaŭ la randon de profunda fendaĵo aŭ malhela ŝakto, foje suben en nigrajn arbustkaŝitajn kavojn kaj denove elen; sed kiam foje ili iris iomete suben, ĉiam la aliflanka deklivo estis pli longa kaj pli kruta. Ili daŭre supreniris. Ĉe la unua haltejo ili retrorigardis, kaj ili povis malklare percepti la supraĵojn de l' arbaro, kiun ili postlasis, kuŝantajn kiel vasta densa ombro, nokton pli malhelan sub la malhela malplena ĉielo. Ŝajnis troviĝi granda nigreco baŭmanta malrapide el la oriento vorante la malfortajn malklarajn stelojn. Pli poste la sinka luno eskapis el la ĉasantaj nuboj, sed ĝin ĉirkaŭringis malsaneca flava helo.

Finfine Golumo turnis sin al la hobitoj.

— Tago baldaŭ, — li diris. — La hobitoj devas hasti. Ne sendanĝeras resti eksterŝirme en tiuj ĉi lokoj. Hastu!

Li rapidigis siajn paŝojn, kaj ili sekvis lin lace. Baldaŭ ili komencis suprengrimpi sur grandan teramason. Plejparte ĝin kovris densa kreskaĵo de uleksoj kaj mirteloj, kaj malaltaj fortikaj dornejoj, kvankam ie-tie apertis maldensejoj, cikatroj de lastatempaj fajroj. La uleksoj plioftiĝis ju pli ili proksimiĝis al la suprejo; tre maljunaj kaj altaj ili estis, magraj kaj krurecaj sube sed dikaj supre, kaj jam elmetis flavajn florojn, kiuj ekbriletis en la mallumo kaj dissendis malfortan dolĉan odoron. Tiom altaj estis la pikaj densejoj, ke la hobitoj povis marŝi senkliniĝe sub ili, trapasante longajn sekajn koridorojn tapiŝitajn de profunda pika humo.

Ĉe la fora rando de tiu ĉi teramaso ili ĉesigis sian marŝadon kaj rampis kaŝiĝe sub implikitan nodaĵon de dornoj. Iliaj torditaj branĉoj, kliniĝantaj al la tero, estis superŝutitaj de grimpa labirinto da maljunaj sovaĝaj rozujoj. En la profunda interno troviĝis kavo, kun traboj el mortaj branĉoj kaj rubusoj, kaj tegmentita de l' unuaj folioj kaj sprosoj de l' printempo. Tie ili kuŝis kelkan tempon, ankoraŭ tro lacaj por manĝi; kaj trarigardante la truojn en la

kovraĵo ili atendis la malrapidan tagiĝon.

Sed tago ne venis, nur morta bruna krepusko. En la oriento estis malhela ruĝa ardo sub la malalta nubaro: tio ne estis ruĝo aŭrora. Trans la dissternitaj terenoj interaj, la montoj de Efelo Duad malserene rigardis al ili, nigraj kaj senformaj sube, kie la nokto densis kaj ne forpasis, dum supre la dentecaj pintoj kaj eĝoj siluetis dure kaj minace antaŭ la fajra ardo. Fore dekstre elstaris granda ŝultro de la montaro, malhela kaj nigra inter la ombroj, puŝiĝante okcidenten.

— Laŭ kiu vojo ni iros de ĉi tie? — demandis Frodo. — Ĉu tio estas la enirejo de... de la Morgula Valo, tie malproksime post tiu nigra maso?

— Ĉu necesas jam pensi pri tio? — diris Sam. — Verŝajne ni ne plu moviĝos dum la nuna tago, se entute temas pri tago, ĉu?

— Eble ne, eble ne, — diris Golumo. — Sed ni devos baldaŭ iri al la Krucvojo. Jes, al la Krucvojo. Jen tie estas la vojo, jes, mastro.

La ruĝa ardo super Mordoro formortis. La krepusko profundiĝis, dum grandaj vaporoj leviĝis en la oriento kaj rampis super ili. Frodo kaj Sam manĝis iomete kaj poste kuŝiĝis, sed Golumo estis malripozema. Li rifuzis manĝi el ilia nutraĵo, sed li trinkis iomete da akvo kaj poste ĉirkaŭrampadis sub la arbustoj, snufante kaj murmurante. Poste subite li malaperis.

— Iras ĉasi, supozeble, — diris Sam kaj oscedis. Estis lia vico dormi la unua, kaj li baldaŭ profundiĝis en sonĝon. Li supozis sin denove en la Bag-Enda ĝardeno serĉante ion; sed sur lia dorso estis peza tornistro, kiu devigis lin kliniĝi. Ĉio ŝajnis tute loloplena kaj fetora, kaj dornoj kaj filikoj invadas la bedojn proksime al la malsupra heĝo. “Tasko por mi, mi tion vidas; sed mi tiom lacas, — li ripetadis. Baldaŭ li rememoris, kion li serĉas. — Mia pipo!” — li diris, kaj ĝuste tiam li vekiĝis.

— Stultulo! — li diris al si, malfermante siajn okulojn kaj scivolante, kial li kuŝas sub la heĝo. — Ĝi estas en via tornistro la tutan tempon! — Poste li konstatis, unue, ke la pipo eble troviĝas en lia tornistro, sed pipherbon li malhavas, kaj poste ke li estas centojn da mejloj de Bag-Endo. Li sidiĝis rekte. Ŝajnis preskaŭ mallume. Kial lia mastro permesis, ke li pludormu ekstervice, plu ĝis la vespero?

— Ĉu vi ne dormis, sinjoro Frodo? — li diris. — Kioma horo estas? Ŝajnas malfrue!

— Ne tiel, — diris Frodo. — Sed la tago malheliĝis anstataŭ heliĝi: pli kaj pli malheliĝas. Laŭ mia scio ankoraŭ ne estas tagmezo, kaj vi dormis nur ĉirkaŭ tri horojn.

— Kio okazas, mi scivolas? — diris Sam. — Ĉu ŝtormo venas? Se jes, ĝi estos la plej terura iam spertita. Mi volas, ke ni estu en profunda truo, ne nur haltigitaj sub heĝo. — Li aŭskultis. — Kio estas tio? Ĉu tondro,

tamburoj, aŭ kio ĝi estas?

— Mi ne scias, — diris Frodo. — Ĝi daŭras jam sufiĉe longe. Foje la tero ŝajnas tremo, foje ŝajnas, ke tio estas batado de la peza aero en l' oreloj.

Sam ĉirkaŭrigardis.

— Kie estas Golumo? — li diris. — ĉu li ankoraŭ ne revenis?

— Ne, — diris Frodo. — Malestis signoj kaj sonoj de li.

— Nu, mi ne povas toleri lin, — diris Sam. — Fakte, mi neniam kunprenis ion dumvojaĝe, kion mi malpli bedaŭrus perdi. Sed tipe de li estus, se post lia multhora akompano li nun perdiĝus, ĝuste kiam ni plej bezonas lin, nome, se li iam utilos al ni, kion mi dubas.

— Vi forgesis pri la marĉejo, — diris Frodo. — Mi esperas, ke nenio malbona okazis al li.

— Kaj mi esperas, ke li ne pretigas trukojn. Kaj ĉiuokaze mi esperas, ke li ne trafos en alies manojn, por tiel diri. Ĉar se tio okazus, ni baldaŭ sidus en kaĉo.

Tiumomente aŭdiĝis denove tambureca subbruo, jam pli laŭta kaj pli profunda. La tero ŝajnis tremi sub iliaj piedoj.

— Mi opinias, ke ni jam sidas en kaĉo, — diris Frodo. — Mi timas, ke nia vojaĝo proksimiĝas al la fino.

— Eble, — diris Sam; — sed *dum oni vivas, ne mankas espero*, kutimis diri mia Avulo, *kaj necesas manĝaĵo*, li plejofte aldonis. Manĝu iom, sinjoro Frodo, kaj poste dormu iom.

La posttagmezo, kiel Sam supozis ĝin nomenda, pasadis. Elrigardante el la kaŝejo li povis vidi nur grizbrunan senombran mondon, velkantan malrapide al anonima senkolora morno. Estis sufoke sed ne varme. Frodo dormis malkviete, turniĝante kaj tordiĝante kaj foje murmurante. Dufoje Sam ŝajnis aŭdi lin prononci la nomon Gandalfo. La tempo ŝajnis treniĝi senfine. Subite Sam aŭdis siblon malantaŭ si, kaj jen aperis Golumo kvarpiede, gvatante ilin per ekbrilaj okuloj.

— Vekiĝu, vekiĝu! Vekiĝu, dormemuloj! — li flustris. — Vekiĝu! La tempo urĝas. Ni devas iri, jes, ni devas iri tuj. La tempo urĝas!

Sam rigardis lin suspekteme: li ŝajnis timigita aŭ ekscitita.

— Ĉu iri nun? Kian trukon vi kovas? Ankoraŭ ne estas la ĝusta horo. Ne povas esti eĉ la tetrinka horo, almenaŭ ne en decaj lokoj, kie tetrinka horo ekzistas.

— Stulte! — siblis Golumo. — Ni estas ne en decaj lokoj. Tempo ekmankas, jes, rapide forpasas. La tempo urĝas. Ni devas iri. Vekiĝu, mastro, vekiĝu! — Li palpskuis Frodon; kaj Frodo, konsterne vekite, sidiĝis subite kaj kaptis lian brakon. Golumo abrupte sin liberigis kaj retroiris.

— Oni ne devas stulti, — li siblis. — Ni devas iri. La tempo urĝas!

Nenion plian ili sukcesis eligi el li. Kie li estis, kaj kion li supozis pretiĝanta kaj hastiginta lin, li rifuzis diri. Sam estis plena je suspektemo kaj tion vidigis; sed Frodo neniun indikon vidigis pri tio, kio trapasas lian menson. Li suspiris, surdorsigis sian tornistron, kaj pretiĝis eliri en la mallumon ĉiam plifortiĝantan.

Tre kaŝiĝeme Golumo gvidis ilin malsupren laŭ la deklivo, laŭeble utiligante kovrejojn, kaj kurante, klinite preskaŭ ĝistere, trans lokojn apertajn; sed la lumo estis jam tiel malhela, ke eĉ akrokula sovaĝa besto apenaŭ povus vidi la hobitojn, kapuĉitajn, en iliaj grizaj manteloj, nek aŭdi ilin marŝantajn tiel singarde, kiel kapablas tiuj etuloj. Sen krako de branĉeto aŭ siblo de folio ili preterpasis kaj malaperis.

Dum ĉirkaŭ unu horo ili pluiris, silente, spalire, deprimitaj pro la morno kaj kompleta senmovo de la tereno, kiun rompis nur de tempo al tempo mallaŭta tondrobruo malproksime aŭ tamburado en iu monteta kavaĵo. Suben de sia kaŝloko ili iris, kaj poste, turniĝinte suden, ili direktiĝis laŭ la plej rekta vojo, kian povis trovi Golumo tra longa malglata deklivo, kiu kliniĝis supren al la montoj. Baldaŭ, ne tre fore, ili vidis arbaran zonon baŭmantan kvazaŭ nigra muro. Kiam ili proksimiĝis, ili konstatis, ke la arboj estis grandaj, ŝajne tre antikvaj, kaj ankoraŭ tre altaj, kvankam iliaj supraĵoj estis nudaj kaj rompitaj, kvazaŭ tempestoj kaj fulmoj trabruus ilin, sed malsukcesis mortigi ilin aŭ skui iliajn profundegajn radikojn.

— La Krucvojo, jes, — flustris Golumo, la unuaj parolitaj vortoj, de kiam ili forlasis sian kaŝlokon. — Ni devas iri tien. — Turninte sin orienten, li gvidis ilin supren laŭ la deklivo; kaj tiam subite jen ĝi estis antaŭ ili: la vojo suden, serpentumanta ĉirkaŭ la eksteraj randoj de la montoj, ĝis baldaŭ ĝi plonĝis en la grandan ringon de arboj.

— Tiu ĉi estas la sola vojo, — flustris Golumo. — Neniuj padoj post la ŝoseo. Neniuj padoj. Ni devas iri al la Krucvojo. Sed rapidu! Estu silentaj!

Tiel ŝtelire, kiel skoltoj en malamika bivako, ili kaŝiris suben al la vojo, kaj ŝteliris laŭ ĝia okcidenta rando sub la ŝtonoza teramaso, grizaj kiel la ŝtonoj kaj silentpiedaj kiel ĉasantaj katoj. Fine ili atingis la arbojn, kaj trovis, ke ili staras en granda sentegmenta ringo, meze aperta al la sombra ĉielo; kaj la spacoj inter aliaj trunkegoj similis al malhelaj arkaĵegoj de ruiniĝinta halo. Ĝuste en la centro renkontiĝis kvar vojoj. Malantaŭ ili troviĝis la vojo al Moranono; antaŭ ili ĝi eliris denove al sia longa vojado suden; dekstre la vojo el malnova Osgiliado alvenis grimpe, kaj, transirinte, forpasis orienten en la mallumon: la kvara vojo, la vojo irota de ili.

Starante momente tie timoplena, Frodo konsciiĝis, ke brilas lumo; li vidis ĝin ardantan sur la vizaĝo de Sam apude. Turninte sin al ĝi, li vidis post arkaĵo de branĉoj la vojon al Osgiliado etendiĝanta preskaŭ tiel rekte

kiel streĉita rubando suben, suben al la okcidento. Tie malproksime post malĝoja Gondoro jam ombre inundita la suno subiris, trovinte finfine la orlon de l' granda malrapide ruliĝanta mortotuko de nuboj kaj falante kiel minaca fajraĵo al la ankoraŭ nemakulita maro. La mallonga ardo trafis enorman sidantan figuron, senmovan kaj solenan kiel la grandaj ŝtonaj reĝoj de Argonato. La jaroj estis maĉintaj ĝin, kaj perfortaj manoj difektis ĝin. Ĝia kapo mankis kaj sur ties loko estis moke starigita ronda krude ĉizita ŝtono, malzorge farbita per sovaĝaj manoj imite al rikana vizaĝo kun unusola ruĝa okulo meze de la frunto. Sur ĝiaj genuoj kaj la fortika seĝo, kaj ĉie sur la piedestalo estis sencelaj skribaĉaĵoj miksitaj kun la fiaj simboloj, kiujn uzas la larvopopolo de Mordoro.

Subite, trafitan de la ebenaj radioj, Frodo vidis la kapon de l' maljuna reĝo: ĝi kuŝis forruliĝinte apud la vojo.

— Vidu, Sam! — li kriis, paroligite de la konsterno. — Vidu! La reĝo havas denove kronon!

La okuloj estis kavaj kaj la ĉizita barbo estis rompita, sed sur la alta severa frunto estis kronaĵo el arĝento kaj oro. Treniĝa plantaĵo kun floroj kiel blankaj steletoj ligis sin al la brovoj, kvazaŭ honorante la falintan reĝon, kaj en la fendaĵetoj de lia ŝtona hararo briletis flavaj sedoj.

— Ili ne povos por ĉiam venki! — diris Frodo. Kaj tiam subite malaperis la mallonga ekvidaĵo. La suno subiris kaj malaperis, kaj kvazaŭ pro ŝutrofermo de lampo venis la nokto.

8

La Ŝtuparo de Cirito Ungol

Golumo tiris la mantelon de Frodo kaj siblis pro timo kaj senpacienco.

— Nepras foriri. Necesas ne stari ĉi tie. Rapidu!

Malvolonte Frodo turnis sian dorson al la okcidento kaj sekvis, kiam lia gvidanto kondukis lin eksteren en la mallumon de la oriento. Ili forlasis la arboringon kaj ŝteliris sur la vojo al la montaro. Ankaŭ tiu vojo direktiĝis rekte dum kelka tempo, sed baldaŭ ĝi komencis forkurbiĝi suden, ĝis ĝi alvenis sub la rokŝultregon, kiun ili jam vidis de malproksime. Nigra kaj forpuŝa ĝi baŭmis super ili, pli malhela ol la malhela ĉielo malantaŭe. Krablante sub ĝia ombro la vojo pluiris, kaj ĉirkaŭinte ĝin saltis denove orienten kaj komencis supreniri krute.

Frodo kaj Sam plandadis plu kun koroj malpezaj, ne plu kapablaj ĝeni sin pri sia endanĝereco. La kapo de Frodo estis klinita; lia ŝarĝo denove kurbigis lin. Tuj kiam la granda Krucvojo estis preterpasita, ĝia pezo, preskaŭ forgesita en Itilio, komencis ree plifortiĝi. Nun, sentante, ke la vojo krutiĝas antaŭ liaj piedoj, li rigardis lacege supren; kaj tiam li vidis ĝin, ĝuste kiel Golumo antaŭdiris: la urbon de la Ringofantomoj. Li kaŭris apud la ŝtonoza rando.

Longdekliva valo, profunda ombrogolfo, retroiris foren en la montaron. Sur la alia flanko, iom distance inter la valaj brakoj, alte sur roka sidloko sur la nigraj genuoj de Efelo Duad, staris la muroj kaj turego de Minaso Morgul. Ĉio ĉirkaŭ ĝi estis malhela, tere kaj ĉiele, sed lumo ĝin banis. Ne la enkarcerigita lunlumo antaŭlonge verŝiĝinta tra la marmoraj muroj de Minaso Itil, Turego de la Luno, bela kaj disradia en kavaĵo de la montoj. Pli pala efektive ol la luno velkanta en iu eklipso estis ties lumo nun, flagranta kaj bloviĝanta kiel fetora elspiraĵo de putriĝo, kadavrolumo, lumo kiu nenion prilumis. Sur la muroj kaj turego vidiĝis fenestroj, kiel sennombraj nigraj truoj rigardantaj internen al malpleneco; sed la plej alta etaĝo de la turego turniĝis malrapide, jen laŭ unu direkto jen laŭ l' alia, grandega fantoma kapo rikananta en la nokton. Momente la tri kunuloj staris tie, kuntiriĝinte, gapante supren per malvolontaj okuloj. Golumo la unua refortiĝis. Ree li urĝe tiris iliajn mantelojn, sed neniun vorton li elparolis. Li preskaŭ trenis ilin antaŭen. Ĉiu paŝo estis kontraŭvola, kaj la tempo ŝajnis malrapidigi sian pasadon, tiel ke dum la intervalo inter levo de piedo kaj ties remeto pasis minutoj de abomeno.

Tiel ili alvenis malrapide al la blanka ponto. Tie la vojo, briletante malforte, transiris rojon meze de la valo, kaj pluiris, serpentumante malrekte supren al la pordo de l' urbo: nigra faŭko, kiu apertis en la ekstera cirklo de la nordaj muroj. Larĝaj ebenaĵoj kuŝis ambaŭrande de l' rojo, ombrecaj herbejoj plenaj je palaj blankaj floroj. Ankaŭ tiuj estis lumantaj, belaj tamen forme hidaj, kiel frenezaj figuroj en malkvieta sonĝo; kaj ili disblovis malfortan naŭzan tombodoron; putriĝa fetoro plenigis la aeron. De herbejo al herbejo traarkis la ponto. Figuroj staris tie ĉekape, lerte skulptitaj laŭ formoj homaj kaj bestecaj, sed ĉiuj koruptitaj kaj naŭzaj. La akvo fluanta sube silentis, kaj ĝi vaporis, sed la vaporo leviĝanta de ĝi, kirlanta kaj tordiĝanta ĉirkaŭ la ponton, estis mortige malvarma. Frodo sentis, ke liaj sentumoj vertiĝas kaj lia menso mallumiĝas. Tiam subite, kvazaŭ efikus iu forto alia ol la propra volo, li ekhastis ŝanceliĝe antaŭen, kun la palpaj manoj etenditaj kaj la kapo pendolanta de flanko al flanko. Sam kaj Golumo ambaŭ postkuris lin. Sam kaptis sian mastron per la brakoj, ĝuste kiam li stumblis kaj preskaŭ falis sur sojlo de la ponto.

— Ne tiuvoje! Ne tiuvoje! — flustris Golumo, sed la spiro inter liaj dentoj ŝajnis traŝiri la pezan kvieton kiel fajfilo, kaj li kaŭris teren en teruro.

— Staru firme, sinjoro Frodo! — murmuris Sam en l' orelon de Frodo. — Revenu! Ne tiuvoje. Golumo diras, ke he, kaj escepte mi konsentas kun li.

Frodo pasigis la manon sur sia frunto kaj forŝiris siajn okulojn de la urbo sur la monteto. La luma turo fascinis lin, kaj li luktis kontraŭ deziro suprenkuri laŭ la brileta vojo al ĝia pordo. Finfine li pene returniĝis, kaj tion farinte li sentis ke la Ringo rezistas, tirante la ĉenon ĉirkaŭ lia kolo; kaj ankaŭ liaj okuloj, kiam li forrigardis, ŝajnis dum momento blindigitaj. La mallumo antaŭ li estis nepenetrebla.

Golumo, rampante tere kvazaŭ timigita besto, jam estis malaperanta en la ombraĵon. Sam subtenante kaj gvidante sian stumblan mastron, sekvis lin laŭeble rapide. Ne malproksime de l' apuda bordo de l' rojo troviĝis breĉo en la ŝtonmuro apud la vojo. Tra tiu ili pasis, kaj Sam vidis, ke ili estas sur mallarĝa pado, kiu ekbrilis malforte komence, samkiel la ĉefvojo, ĝis grimpinte sur la herbejoj de venenaj floroj ĝi velkis kaj senlumiĝis, serpentumante malnete supren laŭ la nordaj flankoj de la valo.

Laŭlonge de tiu pado la hobitoj plandumis unu apud la alia, nepovante vidi Golumon antaŭ si, krom kiam li sin turnis por fingrovoke instigi ilin. Tiam liaj okuloj briletis per lumo verda-blanka, eble spegulante la fian brilon de Morgulo, aŭ ĉendite de iu responda humoro interne. Pri tiu venena ekbrilo kaj pri la mallumaj okultruoj Frodo kaj Sam senĉese konsciis, re kaj re retrorigardante timplene trans la ŝultrojn kaj ĉiam denove trenante siajn

okulojn al trovo de la senluma pado. Malrapide ili penis antaŭen. Dum ili altiĝadis super la fetoron kaj vaporojn de la venena rojo, ili spiris pli facile kaj iliaj kapoj klariĝis; sed nun iliaj membroj estis lacegaj, kvazaŭ ili marŝus la tutan nokton ŝarĝite, aŭ longe naĝadus kontraŭ peza akvofluo. Finfine ili ne povis pluiri senhalte.

Frodo haltis kaj sidiĝis sur ŝtonon. Ili jam grimpis ĝis la supro de granda bulo de nuda monto. Antaŭ ili estis roko en valoflanko, kaj ĉirkaŭ ties supraĵo la vojo pluiris, ne pli ol larĝa breto kun abismo dekstre; trans la apikan sudan facon de la monto ĝi rampis supren, ĝis ĝi malaperis en la mallumo supre.

— Mi devas ripozi iomete, Sam, — flustris Frodo. — Ĝi pezas sur min, knabo Sam, tre pezas. Mi scivolas kiom longe mi povos porti ĝin? Ĉiuokaze mi devas ripozi antaŭ ol ni risku nin sur tion. — Li indikis la mallarĝan vojeton antaŭe.

— Ĉit! ĉit! — siblis Golumo rapidante al ili. — Ĉit! — Liaj fingroj estis ĉebuŝe kaj li skuis urĝe la kapon. Tirante la manikon de Frodo, li indikis la padon; sed Frodo rifuzis moviĝi.

— Ankoraŭ ne, — li diris, — ankoraŭ ne. — Laceco kaj pli ol laceco premis lin; ŝajnis kvazaŭ peza sorĉo efikus al li mense kaj korpe. — Mi devas ripozi, — li murmuris.

Je tio la timo kaj konsterno de Golumo tiel fortiĝis, ke li denove parolis, siblante malantaŭ sia mano, kvazaŭ por forbari la bruon de nevidataj aŭskultantoj en la aero.

— Ne ĉi tie, ne. Ne ĉi tie ripozi. Stultuloj! Okuloj povas vidi nin. Kiam ili alvenos la ponton, ili vidos nin. Venu for! Grimpu, grimpu! Venu!

— Venu, sinjoro Frodo, — diris Sam. — Li pravas denove. Ni ne povas resti ĉi tie.

— Bone, — diris Frodo per voĉo distanceca, kvazaŭ de iu parolanta duondorme. — Mi provos. — Lacege li stariĝis.

Sed estis tro malfrue. Tiumomente la roko moviĝis kaj ektremis sub ili. La forta grumbla bruo, pli laŭta ol iam antaŭe, ruliĝis en la tero kaj eĥis en la montaro. Poste laŭ brula subito venis granda ruĝa flagro. Tre fore post la orientaj montoj ĝi saltis sur la ĉielon kaj plaŭdigis sur la minacajn nudojn karmezinon. En tiu valo de ombro kaj malvarma kruela lumo ĝi ŝajnis netolereble perforta kaj feroca. Ŝtonpintoj kaj firstoj kiel noĉitaj tranĉiloj elsaltis en gapa nigro antaŭ la suprentorenta flamo en Gorgoroto. Poste venis krakego de tondro.

Kaj Minaso Morgul respondis. Vidiĝis flagro de brilegaj fulmoj: forkoj bluflamaj risortiĝis el la turego kaj el la ĉirkaŭaj montoj en la malafablajn nubojn. La tero ĝemis; kaj el la urbo leviĝis kriego. Miksite kun akraj altaj

voĉoj kvazaŭ de predantaj birdoj, kaj la kriĉa henado de ĉevaloj freneze koleraj kaj timoplenaj, venis ŝira kriego, trema, rapide leviĝanta ĝis trapika tonalto ekster atingo de l' aŭdado. La hobitoj turniĝis ĝire tiudirekten, kaj ĵetis sin teren, kovrante permane la orelojn.

Kiam ĉesis la terura kriego, retrofalanta per longa naŭzega veo ĝis silento, Frodo malrapide levis sian kapon. Trans la mallarĝa valo, nun preskaŭ egalnivela kun liaj okuloj, la muroj de l' malica urbo staris, kaj ĝia kaverneca pordo, formita kvazaŭ malfermita buŝo kun brilaj dentoj, gapis malfermite. Kaj tra tiu pordo eliris armeo.

Tiu tuta amaso estis vestita zibele, nigre kiel la nokto. Kontraŭ la palaj muroj kaj la luma pavimo de la vojo Frodo povis vidi ilin, vicon post vico de etaj nigraj figuroj, kiuj marŝis rapide kaj silente, elpasantaj laŭ senfina fluo. Antaŭ ili iris granda rajdistaro moviĝante kiel ordaj ombroj, kaj ĉekape de ili estis unu pli granda ol ĉiuj ceteraj: rajdanto tute nigra, krom ke sur la kapuĉita kapo li portis kronsimilan kaskon, kiu flagris per danĝera lumo. Nun li proksimiĝis al la ponto sube, kaj la gapaj okuloj de Frodo sekvis lin, nekapablaj palpebrumi aŭ forturniĝi. Ĉu tie ne estis la Mastro de l' Naŭ Rajdantoj, reveninta al la tero por konduki sian fian armeon en batalon? Tie, jes efektive tie estis la marasma reĝo, kies frida mano vundis la Ringoportanton per la mortiga tranĉilo. La malnova vundo pulsis dolore kaj granda frostiĝo disvastiĝis al la koro de Frodo.

Ĝuste kiam trapikis lin tiuj pensoj per timego kaj tenis lin ligita kvazaŭ pro sorĉo, subite haltis la Rajdanto, rekte antaŭ la enirejo de la ponto, kaj post li la tuta amaso staris senmove. Sekvis paŭzo, kompleta silento. Eble la Ringo alvokis la Fantommastron, kaj momente li estis perturbita, sentante iun alian potencon interne de sia valo. Tien kaj tien ĉi turniĝis la malhela kapo kaskita kaj kronita je timo, esplorante la ombrojn per siaj nevideblaj okuloj. Frodo atendis, kiel birdo pro proksimiĝo de serpento, ne kapabla moviĝi. Kaj dum li atendis, li sentis, pli urĝan ol iam ajn antaŭe, la ordonon, ke li surmetu la Ringon. Kvankam forta kiel neniam estis la premo, li jam ne sentis emon cedi al ĝi. Li sciis, ke la Ringo perfidos lin, kaj ke li ne posedas, eĉ se li surmetus ĝin, la potencon fronti al la Morgula reĝo — ankoraŭ ne. Jam ne plu estis respondo al tiu ordono en lia propra volo, kvankam ĝi estis senespere timigita, kaj li sentis sur si nur batadon de forta potenco de ekstere. Tiu kaptis lian manon, kaj dum Frodo mense rigardis, ne volante tion sed provizore retenite (kvazaŭ li rigardus iun malnovan rakonton malproksiman), ĝi movis la manon colon post colo al la ĉeno ĉirkaŭ lia kolo. Tiam lia propra volo ekvigliĝis; malrapide ĝi devigis la manon reiri kaj serĉi ion alian, ion kaŝitan apud lia brusto. Malvarma kaj malmola ĝi ŝajnis, kiam lia kroĉo ekprenis ĝin: la flakoneton de Galadriela,

tiom longe valoritan, kaj preskaŭ forgesitan ĝis tiu horo. Kiam li tuŝis ĝin, dum kelka tempo ĉia pensado pri la Ringo estis forbarita de lia menso. Li suspiris kaj klinis la kapon.

Tiumomente la Fantomreĝo turnis sin, spronis sian ĉevalon kaj rajdis trans la ponton, kaj lia tuta malhela armeo sekvis lin. Eble la elfaj kapuĉoj defiis liajn nevideblajn okulojn, kaj la menso de lia eta malamiko, refortigite, flankenturnis liajn pensojn. Sed li hastis. Jam la horo sonoris, kaj ordonite de sia granda Mastro li devis marŝi milite en la okcidenton.

Baldaŭ li forpasis, kiel ombro en ombron, laŭ la serpentuma vojo, kaj daŭre post li transiris la ponton la nigraj vicoj. Tiel granda armeo neniam eliris el tiu valo post la tagoj de l' potenco de Isilduro; neniu amaso tiel danĝera kaj armile forta ĝis nun atakis la travadejon de Anduino; kaj tamen ĝi estis nur unu kaj ne la plej granda el la armeoj, kiujn Mordoro nun ekspedis.

Frodo ekmoviĝis. Kaj subite lia koro turniĝis al Faramiro. "La ŝtormo finfine komenciĝis, — li pensis. — Tiu granda plenarmaĵo da lancoj kaj glavoj direktiĝas al Osgiliado. Ĉu Faramiro transiros ĝustatempe? Li antaŭvidis tion, sed ĉu li konis la horon? Kaj kiuj nun povas defendi la travadejojn, kiam venos la Reĝo de l' Naŭ Rajdantoj? Kaj aliaj armeoj venos. Mi tro malfruis. Ĉio estas perdita. Mi prokrastis survoje. Ĉio estas perdita. Eĉ se mia komisio plenumiĝos, neniu ajn iam scios. Al neniu mi povos raporti. Estos vane". Venkite de malforteco li ekploris. Kaj daŭre la armeo de Morgulo transiris la ponton. Poste je granda distanco, kvazaŭ ĝi venus el memoroj pri la Provinco, iun sunluman frumatenon, kiam vokis la tago kaj pordo malfermiĝis, li aŭdis la voĉon de Sam: "Vekiĝu, sinjoro Frodo! Vekiĝu!" Se la voĉo aldonus: "Via matenmanĝo estas preta", li apenaŭ surpriziĝus. Certe Sam urĝis.

— Vekiĝu, sinjoro Frodo! Ili foriris.

Aŭdiĝis malklara sonoro. La pordego de Minaso Morgul estis fermita. La lasta vico da lancistoj jam malaperis sur la vojo. La turego ankoraŭ rikanis transvale, sed la lumoj en ĝi forvelkis. La tuta urbo retrofalis en malhelan meditan ombrecon kaj silenton. Tamen ankoraŭ ĝi estis plena je gvatemo.

— Vekiĝu, sinjoro Frodo! Ili foriris, kaj ankaŭ ni prefere iru. Ankoraŭ io vivas en tiu loko, io kun okuloj, aŭ vidanta menso, se vi komprenas min; kaj ju pli longe ni restados en unu loko, des pli baldaŭ ĝi malkovros nin. Ek al, sinjoro Frodo!

Frodo levis sian kapon kaj stariĝis. Malespero ne forlasis lin, sed la malforteco forpasis. Li eĉ malgaje ridetis, sentante nun jam tiel klare, kiel antaŭ momento li sentis la malon, ke tion, kion li devos fari, li devos fari, se

eble, kaj estas flanka afero, ĉu Faramiro, Aragorno, Elrondo, Galadriela, Gandalfo aŭ iu alia iam scios pri tio. Li kaptis sian bastonon per unu mano, la flakoneton per la alia. Kiam li vidis, ke la klara lumo jam ŝveliĝas tra liaj fingroj, li ŝovis ĝin en sian sinon kaj tenis ĝin kontraŭ sia koro. Poste turninte sin for de la urbo Morgulo, jam ne pli ol griza brilaĵeto aliflanke de la malhela abismo, li pretiĝis sekvi la vojon supren.

Ŝajne Golumo forrampis laŭ la breto en la mallumon antaŭe, kiam malfermiĝis la pordego de Minaso Morgul, lasinte la hobitojn tie, kie ili kuŝis. Li nun revenis rampe kun klakantaj dentoj kaj klakigitaj fingroj.

— Stulte! Malsaĝe! — li siblis. — Rapidu! Ili ne supozu, ke forpasis la danĝero. Ĝi ne forpasis. Rapidu!

Ili ne respondis, sed ili sekvis lin sur la grimpan breton. Tiu malmulte plaĉis al ambaŭ ili, eĉ ne post frontado al tiomaj aliaj riskoj; sed ĝi ne longe daŭris. Baldaŭ la pado alvenis rondan angulon, kie denove elŝvelis montoflanko, kaj tie ĝi subite eniris mallarĝan aperturon en la roko. Ili atingis la unuan ŝtuparon, pri kiu Golumo parolis. La mallumo estis preskaŭ kompleta, kaj malmulton ili povis vidi post braketendo; sed la okuloj de Golumo brilis pale, plurajn futojn supre, kiam li returnis sin al ili.

— Singarde! — li flustris. — ŝtupoj. Multaj ŝtupoj. Necesas singardi.

Singardo certe necesis. Frodo kaj Sam komence malstreĉiĝis, havante jam muron ambaŭflanke, sed la ŝtuparo estis preskaŭ tiel kruta kiel eskalo, kaj dum ili grimpis ĉiam pli supren, ili pli kaj pli konsciiĝis pri la longa nigra forfalo malantaŭe. Kaj la ŝtupoj estis mallarĝaj, kun malegalaj interspacoj, kaj ofte trompaj: ili estis trivitaj kaj glataj ĉerande, kaj iuj estis rompitaj, kaj iuj fendiĝis pro surmetita piedo. La hobitoj baraktis pluen, ĝis fine ili kroĉiĝadis furioze fingre al la ŝtupoj antaŭ ili, kaj devigis siajn dolorajn genuojn kurbiĝi kaj rektiĝi; kaj ĉiam, dum la ŝtuparo tranĉis vojon pli profunden en la apikan monton, la rokmuroj leviĝis pli kaj pli alte super iliaj kapoj.

Finfine, ĝuste kiam ili sentis, ke ili kapablas nenion pli toleri, ili vidis la okulojn de Golumo subenrigardi al ili.

— Ni jam grimpis, — li flustris. — L’ unua ŝtuparo jam eksas. La lertaj hobitoj grimpis tiel alten, tre lertaj hobitoj. Nur kelkaj pliaj ŝtupetoj kaj finite, jes.

Kapkirliĝa kaj tre laca Sam kun Frodo en sekvo laŭrampis la lastan ŝtupon, kaj tie ili sidiĝis frotante siajn krurojn kaj genuojn. Ili troviĝis en profunda malhela trapasejo, kiu ŝajnis plu supreniri antaŭ ili, kvankam malpli krute kaj senŝtupe. Golumo ne permesis, ke ili ripozu longe.

— Estas ankoraŭ unu ŝtuparo, — li diris. — ŝtuparo multe pli longa. Ripozu kiam ni atingos la supron de l’ proksima ŝtuparo. Ankoraŭ ne.

Sam ĝemis kaj demandis:

— ĉu pli longa, vi diris?

— Jes, jess, pli longa, — diris Golumo. — Sed ne tiom malfacila. La hobitoj jam grimpis la Rektan Ŝtuparon. Poste venas la Serpentuma Ŝtuparo.

— Kaj kio poste? — demandis Sam.

— Ni vidos, — diris Golumo mallaŭte. — Ho jes, ni vidos!

— Al mi ŝajnas, ke vi diris, ke troviĝas tunelo, — diris Sam. — Ĉu ne estas tunelo aŭ io trairota?

— Ho jes, troviĝas tunelo, — diris Golumo. — Sed la hobitoj povos ripozi antaŭ ol provi ĝin. Se ili trapasos tiun, ili estos proksimaj al la supro. Tre proksimaj, se ili trapasos. Ho jes!

Frodo tremetis. La grimpado ŝvitigis lin, sed li jam sentis sin malvarma kaj humida, kaj en la trapasejo estis frosta trablovo de la nevideblaj altaĵoj supre. Li stariĝis kaj skuis sin.

— Nu, ni pluiru! — li diris. — Ĉi tie ne estas taŭga sidloko.

La trapasejo ŝajnis etendiĝi tra mejloj, kaj ĉiam la frosta aero transfluis ilin, fortiĝante dum ilia progreso al malvarmega vento. La montoj ŝajnis klopodi per sia venena spiro senkuraĝigi ilin, forturni ilin de l' sekretoj de la altejoj, aŭ forblovi ilin en la mallumon malantaŭe. Ili nur konsciis, ke ili atingis la finon, kiam subite ne plu estis muro dekstre. Ili povis vidi nur tre malmulton. Grandaj nigraj senformaj amasoj kaj profundaj grizaj ombroj baŭmis antaŭ ili kaj ĉirkaŭ ili, sed de tempo al tempo malakra ruĝa lumo flagris supren sub la malalta nubaro, kaj momente ili konsciiĝis pri altaj pintoj, antaŭe kaj ambaŭflanke, kvazaŭ pilastroj apogantaj vastan subfleksiĝantan tegmenton. Ŝajnis, ke ili suprengrimpis multajn centojn da futoj sur larĝan breton. Klifo troviĝis maldekstre kaj abismo dekstre.

Golumo gvidis ilin proksime laŭ la klifo. Provizore ili ne plu grimpis, sed la tereno estis jam pli malglata kaj danĝera en la mallumo, kaj troviĝis sur la vojo blokoj kaj buloj da falintaj ŝtonoj. Ilia irado estis malrapida kaj singardema. Kiom da horoj pasis, post kiam ili eniris la Morgulan Valon, nek Sarn nek Frodo povis plu diveni. La nokto ŝajnis senfina.

Finfine ili denove konsciiĝis pri muro baŭmanta, kaj denove malfermiĝis antaŭ ili ŝtuparo. Denove ili haltis, kaj denove ili komencis grimpi. La supreniro estis longa kaj laciga; sed tiu ĉi ŝtuparo ne fosis en la montflankon. Ĉi tie la grandega klifsurfaco kliniĝis malantaŭen, kaj la pado serpentume kurbiĝis tien-reen sur ĝi. Unuloke ĝi flankiĝis dekstren al la rando de l' malhela abismo, kaj Frodo ekrigardante suben vidis sub si kiel vastan profundan ŝakton la grandan ravinon kape de la Morgula Valo. En ties profundo ekbrilis kvazaŭ lumbrika fadeno la fantoma vojo de la mortinta urbo ĝis la Sennoma Pasejo. Li haste forturnis sin.

Pluen kaj supren la ŝtupvojo kurbis kaj rampis, ĝis fine per lasta etendiĝo mallonga kaj rekta ĝi elrampis sur alian nivelon. La pado estis forturniĝinta de la ĉefa trapasejo en la granda ravino, kaj ĝi nun sekvis sian propran danĝeran vojon sube de malpli granda fendejo inter la pli altaj regionoj de Efelo Duad. Malklare la hobitoj povis vidi altajn pilierojn kaj akrangulajn pinaklojn el ŝtono ambaŭflanke, inter kiuj estis grandaj fendaĵoj kaj dissplitaĵo el ŝtono pli nigraj ol la nokto, kies forgesitaj vintroj jam delonge maĉis kaj ĉizelis la sensunan ŝtonon. Kaj nun la ruĝa lumo sur la ĉielo ŝajnis pli forta; kvankam ili ne povis scii, ĉu terura mateno efektive venas al tiu ĉi ombra loko, aŭ ĉu ili vidas nur la flamon de ia granda perfortaĵo de Saŭrono dum la turmentado de Gorgoroto transmontare. Antaŭ si, tre malproksime kaj ankoraŭ tre alte super si, Frodo suprenrigardante vidis, laŭ sia supozo, la veran verton de tiu ĉi malfacilega vojo. Antaŭ la malafabla ruĝo de l' orienta ĉielo estis vidigita fendego sur la plej supra firsto, malvasta, profunde elmordita inter du nigraj ŝultroj; kaj sur ambaŭ ŝultroj estis po korno el ŝtono.

Li paŭzis kaj rigardis pli atente. La korno maldekstra estis alta kaj svelta; kaj en ĝi flamis ruĝa lumo, aŭ eble la ruĝa lumo en la lando transa brilis tra truo. Li nun vidis, ke tio estas nigra turego ŝvebanta super la fora pasejo.

— Al mi ne plaĉas ties aspekto! — diris Sam. — Do tiu ĉi via sekreta vojo estas finfine gardata, — li graŭlis, sin turninte al Golumo. — Kiel vi la tutan tempon sciis, supozeble?

— Ĉiuj vojoj estas gardataj, jes, — diris Golumo. — Kompreneble tiel. Sed la hobitoj devos provi iun vojon. Tiu vojo eble estas malplej gardata. Eble ili ĉiuj foriris al granda batalo, eble!

— Eble, — gruntis Sam. — Nu, ĝi ŝajnas ankoraŭ tre malproksima kaj longa vojo supren, ĝis ni alvenos tien. Kaj troviĝas ankoraŭ la tunelo. Mi opinias, ke nun vi devus ripozi, sinjoro Frodo. Mi ne scias, kioma horo tage aŭ nokte estas, sed ni vojaĝas seninterrompe dum horoj kaj horoj.

— Jes, ni devas ripozi, — diris Frodo. — Ni trovu iun angulon for de la vento kaj renovigu nian forton por la lasta etapo.

Ĉar tia li supozis ĝin. La teruraĵoj de la lando post ĝi kaj la tiea farotaĵo, ŝajnis malaktualaj, ankoraŭ tro foraj por ĝeni lin. Lia tuta menso direktiĝis al trairo aŭ transiro de tiuj nepenetreblaj muro kaj gardado. Se nur li faras tiun neeblaĵon, poste iel la komisio estus plenumota, aŭ tiel ŝajnis al li dum tiu malhela horo de laceco, ankoraŭ penante en la ŝtonaj ombroj sub Cirito Ungol.

En malluma fendo inter du grandaj rokpilastroj ili sidiĝis: Frodo kaj Sam iom interne, kaj Golumo kaŭris surtere proksime al la elirejo. Tie la

hobitoj englutis tion, kion ili supozis la lasta manĝo antaŭ la descendo en la Sennoman Landon, eble la lasta manĝo, kiun ili iam manĝos kune. Iom el la nutraĵo de Gondoro ili konsumis, kaj oblatojn el la elfa vojpano, kaj ili iom trinketis. Sed pri la akvo ili konservemis kaj prenis nur sufiĉe por malseketigi siajn sekajn buŝojn.

— Mi scivolas, kiam ni denove trovos akvon? — diris Sam. — Sed supozeble tie transe ili ankaŭ trinkas, ĉu? Orkoj trinkas, ĉu ne?

— Jes, ili trinkas, — diris Frodo. — Sed ni ne parolu pri tio. Tia trinkaĵo ne taŭgas por ni.

— Sekve tiom pli necesas plenigi niajn akvujojn, — diris Sam. — Sed ĉi tie ne estas akvo: nek bruon nek tinton mi aŭdis. Kaj ĉiuokaze Faramiro diris, ke ni trinku neniom da akvo en Morgulo.

— Neniu akvo fluanta el Imlado Morgul, estis liaj vortoj, — diris Frodo. — Ni jam ne estas en tiu valo, kaj se ni trovus fonton, tiu fluus en ĝin sed ne el ĝi.

— Mi ne fidus al ĝi, — diris Sam, — ne ĝis mi mortus pro soifo. Tiu ĉi loko sentiĝas mise. — Li snufis. — Kaj odorante, mi konjektas. Ĉu vi rimarkas tion? Stranga odoro, premaera. Mi ne ŝatas ĝin.

— Tute nenion mi ŝatas ĉi tie, — diris Frodo, — nek ŝtupon nek ŝtonon, nek spiron nek oston. Tero, aero kaj akvo ĉiuj ŝajnas malbenitaj. Sed tien kondukas nia vojo.

— Jes, tio estas vera, — diris Sam. — Kaj ni tute ne estus ĉi tie, se ni scius pli pri la loko antaŭ ol ni ekvojaĝis. Sed supozeble okazas ofte tiel. La bravaĵoj en la malnovaj rakontoj kaj kantoj, sinjoro Frodo: aventuroj mi kutime nomis ilin. Mi kutimis pensi, ke tiuj estas aferoj, kiujn la mirindaj personoj en la rakontoj eliris serĉi, ĉar ili deziris ilin, ĉar ili estis stimulaj kaj la vivo estis iom malvigla, speco de sporto, kiel oni povus diri. Sed ne estas tiel en la rakontoj vere gravaj, nek en tiuj, kiuj restas en la menso. Personoj ŝajnis nur hazarde trafi ilin, kutime tien kondukis ilia vojo, kiel vi esprimis tion. Sed mi supozas, ke ili disponis multajn eblecojn, kiel ni, por retroiri, sed tion ne faris. Kaj se ili farus, ni tion ne scius, ĉar ili estus forgesitaj. Ni aŭdas pri tiuj, kiuj simple pluiris, kaj ne ĉiuj al bona fino, komprenu; almenaŭ ne al tia fino, kian la personoj interne de rakonto kaj ne ekstere nomas fino bona. Vi komprenas: veni hejmen kaj trovi ĉion en ordo, kvankam ne tute sama, kiel maljuna sinjoro Bilbo. Sed tiuj ne estas ĉiam la plej preferindaj rakontoj, kvankam ili eble estas la preferinde partoprenataj rakontoj! Mi scivolas, en kian rakonton ni enfalis.

— Mi scivolas, — diris Frodo. — Sed mi ne scias. Kaj tiel estas en reala rakonto. Pripensu iun ajn, kiun vi ŝatas. Vi eble scias, aŭ divenas, kia rakonto ĝi estas, ĉu feliĉfina ĉu tristfina, sed la personoj en ĝi ne scias tion.

Kaj vi ne deziras, ke ili sciu.

— Ne, sinjoro, kompreneble ne. Bereno, ekzemple, li ja ne supozis, ke li ricevos tiun Silmarilon de la Fera Krono en Tangorodrimo, kaj tamen li jes, kaj tio estis loko pli malbona kaj danĝero pli nigra ol la niaj. Sed tio estas longa rakonto, kompreneble, kaj pludaŭras post la feliĉo kaj en la malĝojon kaj preteren. Kaj la Silmarilo pluiris kaj alvenis Erendilon. Kaj vidu, sinjoro, mi neniam pli frue pensis pri tio! Ni havas... vi ja havas iom el ties lumo en tiu stelvitro, kiun la Damo donis al vi! Nu, pripensinde, ni ankoraŭ estas en la sama rakonto! Ĝi daŭras plu. Ĉu la grandaj rakontoj neniam finiĝas?

— Ne, ili neniam finiĝas kiel rakontoj, — diris Frodo. — Sed la personoj en ili venas kaj foriras, kiam finiĝas ilia parto. Nia parto finiĝos. Pli aŭ malpli baldaŭ.

— Kaj tiam ni povos havi iom da ripozo kaj iom da dormo, — diris Sam. Li ridis malgaje. — Kaj ĝuste tion mi aludas, sinjoro Frodo. Mi aludas senornaman ordinaran ripozon, kaj dormon, kaj vekiĝon al mateno de laboro enĝardena. Mi timas, ke nur tion mi esperas la tutan tempon. Ĉiuj grandaj gravaj projektoj ne konvenas al miaspeculoj. Tamen, mi scivolas, ĉu ni iam inkluziviĝos en kantoj kaj rakontoj. Ni troviĝas en unu, kompreneble; sed mi volas diri: envortigite, vi scias, rakontite apudfajruje, aŭ voĉlegite el granda librego kun ruĝaj kaj nigraj literoj, jarojn kaj jarojn poste. Kaj oni diros: “Ni aŭdu pri Frodo kaj la Ringo!” Kaj oni diros: “Jes, tio estas unu el miaj plej ŝatataj rakontoj. Frodo estis tre kuraĝa, ĉu ne, paĉjo?” — “Jes, knabo mia, la plej fama el la hobitoj, kaj tio estas granda pretendo”.

— Ĝi estas pretendo multe tro granda, — diris Frodo kaj ridis longan klaran ridon el la koro. Tia sono ne estis aŭdita en tiuj lokoj ekde kiam Saŭrono venis al Mez-Tero. Al Sam subite ŝajnis, ke ĉiuj aŭskultas kaj la altaj rokoj kliniĝis super ili. Sed Frodo ne atentis ilin; li ridis denove. — Nu, Sam, aŭdi vin tiel gajigas min, kvazaŭ la rakonto estus jam verkita. Sed vi ellasis unu el la ĉefaj rolantoj: Samsaĝo la bravkora. “Mi volas aŭdi pli pri Sam, paĉjo. Kial oni ne inkluzivis pli el liaj paroloj, paĉjo? Tiu plaĉas al mi, ĝi ridigas min. Kaj Frodo ne progresus tiel bone sen Sam, ĉu ne, paĉjo?”

— Vidu, sinjoro Frodo, — diris Sam, — ne indas moki. Mi parolis serioze.

— Ankaŭ mi, — diris Frodo, — kaj daŭre seriozas. Ni impetas iom tro rapide. Vi kaj mi, Sam, ankoraŭ estas implikitaj en la plej malagrablaj partoj de la rakonto, kaj estas nur tro verŝajne, ke iuj diris ĉipunkte: “Fermu jam la libron, paĉjo; ni ne volas legi plu”.

— Eble, — diris Sam, — sed ne mi estus tion diranta. Aferoj faritaj, finitaj kaj inkluzivitaj en la grandaj rakontoj estas alispecaj. Nu, eĉ Golumo

eble valorus en la rakonto, ĉiuokaze pli valorus, ol kiam li nin apudas. Kaj ankaŭ li mem iam ŝatis rakontojn, laŭ lia propra atesto. Mi scivolas, ĉu li supozas sin heroo aŭ la malbonulo? Golumo! — li vokis. — Ĉu plaĉus al vi esti la heroo; nu, kien li denove malaperis?

Mankis signo pri li ĉe la enirejo de ilia ŝirmejo kaj en la proksimaj ombroj. Li ja rifuzis ilian nutraĵon, kvankam kiel kutime li akceptis buŝplenon da akvo; kaj poste li ŝajnis kunvolviĝi dormonte. Ili supozis, ke almenaŭ unu el liaj celoj dum lia longa foresto dum la antaŭa tago estis ĉasi manĝaĵon propragustan; kaj nun li evidente forŝteliĝis denove, dum ili parolis. Sed por kio ĉi-foje?

— Al mi ne plaĉas lia forŝteliro senaverta, — diris Sam. — Kaj plej malplaĉas nuntempe. Li certe ne serĉas manĝaĵon ĉi-supre, krom se ekzistas iu roko, kiun li frandas. Vidu, eĉ musko tute mankas.

— Ne valoras zorgiĝi pri li nun, — diris Frodo. — Ni ne povus veni tiel malproksimen, eĉ ne en vidodistanco de la trapasejo, sen li, kaj tial ni devas toleri liajn morojn. Se li perfidemas, li perfidemas.

— Tamen mi preferus, ke li estu videbla, — diris Sam. — Tiom pli, se li perfidemas. Ĉu vi memoras, ke li neniam konsentis diri, ĉu la pasejo estas gardata aŭ ne? Kaj nun ni vidas tie turegon; eble ĝi estas malplena, eble ne. Ĉu vi opinias, ke li iris alkonduki ilin, orkojn, aŭ kio ili estas?

— Ne, tion mi ne supozas, — respondis Frodo. — Eĉ se li okupiĝas pri iu misaĵo, kaj supozeble tio ne malverŝajnas. Mi ne supozas, ke temas pri tio: ne por alkonduki orkojn, aŭ iujn servistojn de l’ Malamiko. Kial atendi ĝis nun, kaj travivi la penadon de la grimpo, kaj tiom proksimiĝi al la lando, kiun li timas? Li verŝajne povis perfidi nin al la orkoj multfoje de kiam ni renkontis lin. Ne, se estas io, tio certe estas iu privata truketo de li mem, kiun li supozas tute sekreta.

— Nu, supozeble vi pravas, sinjoro Frodo, — diris Sam. — Kvankam tio ne tre konsolas min. Mi certe ne eraras; sendube li transdonus *min* al orkoj, volonte kaj senhezite. Sed mi forgesis lian trezoron. Ne, mi supozas, ke la tutan tempon temis pri *La trezoro por kompatinda Smeagolo*. Tio estas la sola koncepto de ĉiuj liaj intrigetoj, se tiajn li havas. Sed kiel gvidado de ni ĉi tien helpos lin tiurilate, tion mi ne kapablas diveni.

— Tre probable li mem ne kapablas tion diveni, — diris Frodo. — Kaj mi ne opinias, ke li havas en la konfuzita kapo nur unu klaran projekton. Mi opinias, ke efektive li parte klopodas protekti la trezoron kontraŭ la Malamiko kiel eble plej longe. Ĉar estus fina katastrofo por li, se la Malamiko akirus ĝin. Kaj aliflanke, eble li nur pacience atendas hazardan okazon.

— Jes, Putorulo kaj Fetorulo, kiel mi diris pli frue, — diris Sam. — Sed

ju pli ili proksimiĝos al la lando de la Malamiko, des pli simila al Fetorulo iĝos Putorulo. Atentu mian diron: se iam ni alvenos la pasejon, li ne permesos, ke ni efektive translimigu la trezoregon sen iaspeca interveno.

— Ni ankoraŭ ne alvenis tien, — diris Frodo.

— Ne, sed prefere ni sentinelu ĝis tiam. Se ni estos surprizitaj, Fetorulo sufiĉe rapide superulos. Malgraŭ tio, estos sendanĝere, se vi nun dormetos, mastro. Sendanĝere, se vi kuŝos proksime al mi. Mi vere ĝojus vidi vin dormanta. Mi gardos vin; kaj ĉiuokaze, se vi kuŝos proksime, en mia ĉirkaŭbrako, neniu povos veni al vi palpe sen tio, ke via Sam scios tion.

— Dormi! — diris Frodo kaj suspiris, kvazaŭ en dezerto li vidus miraĝon friske verdan. — Jes, eĉ ĉi tie mi povus dormi.

— Dormu do, mastro! Kuŝigu vian kapon sur mian sinon.

Kaj tiel Golumo trovis ilin horojn poste, kiam li revenis, rampante ŝtelire laŭ la pado el la mallumo antaŭe. Sam sidis apogite de la ŝtono, kun la kapo falinta flanken kaj peza spirado. Sur lia sino kuŝis la kapo de Frodo, droninta en profunda dormo; sur lia blanka frunto kuŝis unu el la brunaj manoj de Sam, kaj la alia kuŝis malpeze sur la brusto de l' mastro. Trankvilo vidiĝis sur ambaŭ vizaĝoj.

Golumo rigardis ilin. Stranga esprimo trapasis lian magran malsatan vizaĝon. La ekbrilo forvelkis el liaj okuloj, kaj ili iĝis malklaraj kaj grizaj, maljunaj kaj lacaj. Dolorspasmo ŝajnis tordi lin, kaj li forturniĝis, retrogvatante al la pasejo, skuante sian kapon, kvazaŭ okupite de ia interna debato. Poste li revenis, kaj malrapide etendinte la treman manon tre singarde li tuŝis la genuon de Frodo. Tiu tuŝo estis preskaŭ kareso. Dum momenteto, se iu el la dormantoj vidus lin, li supozus rigardi maljunan lacan hobiton, ŝrumpintan pro la jaroj, kiuj portis lin multe preter lian tempon, preter amikojn kaj parencojn, kaj la kampojn kaj rojojn de l' juneco, maljunan malsatan kompatindulon.

Sed pro tiu tuŝo Frodo ekmoviĝis kaj elkriis mallaŭte dum la dormo, kaj tuj Sam estis vigle maldorma. Lia unua vidaĵo estis Golumo — "palpanta la mastron", laŭ lia supozo.

— Hej, vi! — li diris malmilde. — Kion vi faraĉas?

— Nenion, nenion, — diris Golumo mallaŭte. — Afabla mastro!

— Sendube, — diris Sam. — Sed kie vi estadis, ŝtelirante foren kaj reen, maljuna kanajlo?

Golumo retiriĝis, kaj verda ekflagro ekbrilis sub liaj pezaj palpebroj. Preskaŭ araneeca li nun aspektis, kaŭrante malantaŭen sur la kurbaj membroj kaj kun elstaraj okuloj. Jam pasis la momenteto, nerevokeble.

— ŝtelirante, ŝtelirante! — li siblis. — La hobitoj ĉiam tre ĝentilas, jes. Ho, afablaj hobitoj! Smeagolo gvidas ilin laŭ sekretaj vojoj, kiujn neniu alia

scius trovi. Laca li estas, soifa li estas, jes soifa; kaj li gvidas ilin kaj li serĉas padojn, kaj ili diras: *ŝteliri, ŝteliri*. Tre afablaj amikoj, ho jes, mia trezoro, tre afablaj.

Sam sentis sin iom rimorsa, tamen ne pli fidema.

— Pardonpete, — li diris. — Mi bedaŭras, sed vi abrupte vekis min. Kaj mi devis ne dormi, kaj tio iom akrigis min. Sed sinjoro Frodo tiom lacas, ke mi petis lin fermi la palpebrojn, kaj, nu, tia estas la afero. Pardonpete. Sed kie vi efektive estis?

— Ŝteliris, — diris Golumo, kaj la verda ekbrilo ne forlasis liajn okulojn.

— Ho, tre bone, — diris Sam, — laŭ via volo! Supozeble ne malproksime de la vero. Kaj nun ni prefere ĉiuj ŝteliru kune. Kioma horo estas? Ĉu estas hodiaŭ aŭ morgaŭ.

— Estas morgaŭ, aŭ hodiaŭ estis morgaŭ, kiam la hobitoj ekdormis. Tre stulte, tre danĝere, se kompatinda Smeagolo ne ŝtelirus sentinele.

— Mi opinias, ke ni ĉiuj baldaŭ tediĝos pri tiu vorto, — diris Sam. — Sed ne ĝenu vin. Mi vekos la mastron. — Li delikate forpuŝis la hararon de l' frunto de Frodo, kaj kliniĝinte suben alparolis lin mallaŭte.

— Vekiĝu, sinjoro Frodo! Vekiĝu!

Frodo ekmoviĝis kaj malfermis siajn okulojn, kaj ridetis vidante la vizaĝon de Sam klinitan super li.

— Vekas min frue, ĉu ne, Sam? — li diris. — Estas ankoraŭ mallume!

— Jes, estas ĉiam mallume ĉi tie, — diris Sam. — Sed Golumo revenis, sinjoro Frodo, kaj li diras, ke estas morgaŭ. Do ni devas marŝi plu. La lasta etapo.

Frodo profunde enspiris kaj sidiĝis.

— La lasta etapo! — li diris. — Saluton, Smeagolo! Ĉu trovis nutraĵon? ĉu vi entute ripozis?

— Nenian nutraĵon, nenian ripozon, nenion por Smeagolo, — diris Golumo. — Li estas ŝtelirinto.

Sam klakigis la langon, sed bridis sin.

— Ne parolu tiel pri vi, Smeagolo, — diris Frodo. — Tio estas malprudenta, ĉu ĝi veras aŭ ne.

— Smeagolo devas akcepti, kion oni donas, — respondis Golumo. — Kaj tiun nomon donis al li afabla mastro Samsaĝo, tre scioplena hobito.

Frodo rigardis al Sam.

— Jes, sinjoro, — li diris. — Mi efektive uzis tiun vorton, subite vekiĝinte kaj tiel plu kaj trovinte lin apuda. Mi diris, ke mi pardonpetas, sed baldaŭ mi ne plu sentos tion.

— Do lasu ĝin, ĉu ne, — diris Frodo. — Sed nun ŝajnas, ke ni venis al la

punkto, vi kaj mi, Smeagolo. Diru al mi. Ĉu ni mem povos trovi la ceteran vojon? Ni povas vidi la pasejon, enirvojon, kaj se ni povas jam trovi ĝin, supozeble oni povas diri, ke finiĝis nia interkonsento. Vi faris laŭ via promeso, kaj vi estas libera: libera reiri al nutraĵo kaj ripozo, kien ajn vi volas iri, krom al servistoj de la Malamiko. Kaj iam mi eble rekompencos vin, mi aŭ tiuj, kiuj memoros min.

— Ne, ne, ankoraŭ ne, — Golumo vekriis. — Ho ne! Hi ne povas mem trovi la vojon, ĉu? Ho ne efektive. Venos la tunelo. Smeagolo devas pluiri. Sen ripozo. Sen nutraĵo. Ankoraŭ ne.

9

La fikuŝejo de Ŝeloba

Eble ja estis nun tago, kiel diris Golumo, sed la hobitoj povis vidi malmulte da diferenco, krom, eble, ke la ĉielo supre estis malpli nigrega, pli simila al granda fumtegmento; dum anstataŭ la mallumo profundnokta, kiu plu ŝvebis en fendetoj kaj truoj, griza malklariga ombro vualis la ŝtonan mondon ĉirkaŭ ili. Ili pluiris, Golumo antaŭe kaj la hobitoj unu apud la alia, supren laŭ la longa ravino inter la pilastroj kaj kolonoj el ŝirita kaj veterumita roko starantaj kvazaŭ grandegaj senformaj statuoj ambaŭflanke. Malestis sonoj. Iom antaŭe, eble unu-du mejlojn, estis griza murego, lasta suprenŝovita maso da monta ŝtono. Pli malhela ĝi baŭmis, kaj grade altiĝis, dum ili proksimiĝis, ĝis ĝi turumis alte super ili, barante vidon al ĉio, kio troviĝis poste. Profunda ombro kuŝis antaŭ ĝia subo. Sam snufis la aeron.

— Ah! Tiu fetoro! — li diris. — Ĝi pli kaj pli fortiĝas.

Baldaŭ ili estis sub la ombro, kaj tie meze de ĝi ili vidis la enirejon de kaverno.

— Jen la eniro, — diris Golumo mallaŭte. — La eniro de la tunelo. Li ne prononcis ĝian nomon: Toreĥo Ungol, Fikuŝejo de Ŝeloba. El ĝi venis odoraĉo, ne la malsana putrodoro en la herbejoj de Morgulo, sed naŭza fetoro, kvazaŭ malpuraĵo nenomebla amasiĝus kaj konserviĝus en la interna mallumo.

— Ĉu jen la sola vojo, Smeagolo? — demandis Frodo.

— Jes, jes, — li respondis. — Jes, ni devos iri nun tiuvoje.

— Ĉu vi volas diri, ke vi jam trairis tiun truon? — diris Sam. — Fu! Sed eble ne malplaĉas al vi fiodoroj.

La okuloj de Golumo ekbrilis.

— Li ne scias, kio ne malplaĉas, ĉu, trezoro? Ne, li ne scias. Sed Smeagolo kapablas toleri. Jes. Li trairis, ho jes, tute trairis. Ĝi estas la sola vojo.

— Kaj kio kreas la fiodoron, mi scivolas, — diris Sam. — Ĝi similas... nu, mi ne volonte dirus. Iu besteca truo de la orkoj, mi garantias, kun ilia centjara malpuraĵo interne.

— Nu, — diris Frodo, — kun aŭ sen orkoj, se ĝi estas la sola vojo, ni devos iri ĝin.

Profunde enspirinte ili eniris. Post kelkaj paŝoj ili troviĝis en kompleta kaj nepenetrebla mallumo. Post la senlumaj koridoroj de Morio Frodo kaj

Sam ne spertis tian malhelon, kaj se eble tiu ĉi estis pli profunda kaj pli densa. Tie troviĝis aero moviĝanta, kaj eĥoj, kaj sento de spaco. Ĉi tie la aero estis senmova, stagna, peza, kaj bruoj mortfalis. Ili marŝis kvazaŭ en nigra vaporo kreita el vera mallumo mem, kiu spirate blindigis ne nur la okulojn, sed ankaŭ la menson, tiel ke eĉ memoro pri koloroj kaj formoj kaj iu ajn lumo forvelkis de la pensado. Nokto ĉiam estis, kaj ĉiam estos, kaj nokto estis ĉio.

Sed dum iom da tempo ili povis ankoraŭ senti, kaj fakte la sentumoj de iliaj piedoj kaj fingroj komence ŝajnis akrigitaj preskaŭ dolore. La muroj sentiĝis, je ilia surprizo, glataj, kaj la planko, escepte de paŝo de tempo al tempo, estis rekta kaj ebena, ĉiam supriĝanta laŭ sendevia kruta deklivo. La tunelo estis alta kaj larĝa, tiel larĝa ke, kvankam la hobitoj marŝis unu apud la alia, nur tuŝante la murojn per la etenditaj brakoj, ili estis disigitaj, izolitaj en la mallumo.

Golumo eniris la unua kaj ŝajnis nur kelkajn paŝojn antaŭe. Dum ili ankoraŭ povis atenti tiajn aferojn, ili povis aŭdi lian spiron siblanta kaj anhelanta ĝuste antaŭ ili. Sed post kelka tempo iliaj sentumoj iĝis malpli fortaj, tiel tuŝado kiel aŭdado ŝajnis sensentiĝi, kaj ili pluiris palpante, marŝante, ĉiam antaŭen, ĉefe pro la forto de la volo, laŭ kiu ili eniris, volo trairi kaj deziro atingi finfine la altan pordon transe.

Antaŭ ol ili progresis tre multe, eble, tamen tempo kaj distanco baldaŭ ĉesis kalkulebli, Sam dekstre, palpante la muron, konsciiĝis pri alia aperturo ĉeflanke: dum momento li rimarkis malfortan spiron de aero malpli densa, kaj poste ili preterpasis ĝin.

— Troviĝas pli ol unu koridoro ĉi tie, — li flustris pene: ŝajnis malfacile sonigi sian spiron. — Tio ĉi estas loko tiel orkeca, kiel loko iam povus esti.

Post tio, unue li dekstre, kaj poste Frodo maldekstre, preterpasis tri-kvar similajn aperturojn, iujn pli larĝajn, iujn pli malgrandajn; sed ankoraŭ la ĉefa vojo estis nedubebla, ĉar tiu estis rekta kaj sendevia, kaj ĝi daŭre supreniris. Sed kiom longa ĝi estis, kiom pli el ĝi ili devos toleri, aŭ povos toleri? La senspireco de la aero plifortiĝis, dum ili supreniris; kaj nun en la blindiga senlumo ili ofte ŝajnis senti ian reziston pli densan ol la fia aero. Dum ili puŝis sin antaŭen, ili sentis ion ektuŝanta la kapojn, aŭ la manojn, longajn tentaklojn, aŭ pendajn kreskaĵojn eble: ili ne povis konstati, kio estas tio. Kaj daŭre la fiodoro plifortiĝis. Ĝi plifortiĝis, ĝis preskaŭ ŝajnis al ili, ke flaro estas la sola sentumo klara, kiu restas al ili, kaj tio estas por turmenti ilin. Unu horon, du horojn, tri horojn: kiom ili jam pasigis en tiu ĉi senluma truo? Horojn... prefere tagojn, semajnojn. Sam forlasis la tunelflankon kaj kuntiriĝis al Frodo, kaj iliaj manoj renkontiĝis kaj kroĉiĝis, kaj tiel ili kune pluiris ankoraŭ.

Fine Frodo, palpante laŭ la maldekstra muro, subite alvenis vakejon. Li preskaŭ falis flanken en la malplenon. Tie estis iu aperturo en la roko multe pli larĝa ol iuj en la jam preterpasitaj; kaj el ĝi venis fetoro tiel fia kaj sento pri embuska malico tiel intensa, ke Frodo ŝanceliĝis. Kaj tiumomente ankaŭ Sam skuiĝis kaj falis antaŭen.

Rezistante tiel la naŭzon kiel la timon, Frodo kroĉis la manon de Sam.

— Stariĝu! — li diris per raŭka senvoĉa spiro. — Ĉio originas ĉi tie, la fetoro kaj la danĝero. Venis la tempo! Rapidu!

Utiligante la restaĵon de siaj forto kaj kuraĝo, li trene starigis Samon, kaj devigis moviĝi siajn proprajn membrojn. Sam stumble akompanis lin. Unu paŝon, du paŝojn, tri paŝojn... finfine ses paŝojn. Eble ili jam pasis la teruran nevideblan aperturon, sed ĉu tiel estis aŭ ne, subite estis pli facile moviĝi, kvazaŭ iu malamikeca volo momente liberigus ilin. Ili baraktis antaŭen, ankoraŭ man-en-mane.

Sed preskaŭ tuj ili frontis novan malfacilon. La tunelo disduiĝis, aŭ tiel ŝajnis, kaj pro la mallumo ili ne sciis, kiu vojo estas pli larĝa, aŭ kiu el ili pluiras pli rekte. Kiun el ili laŭiri, ĉu la dekstran, aŭ la maldekstran? Ili sciis pri neniu gvidindiko, tamen malĝusta elekto estos preskaŭ certe fatala.

— Laŭ kiu vojo iris Golumo? — anhelis Sam. — Kaj kial li ne atendis?

— Smeagolo! — diris Frodo, klopodante voki. — Smeagolo! — Sed lia voĉo raŭkis, kaj la nomo mortfalis preskaŭ tuj post eliro. Venis neniu respondo, eĉ ne eĥo, eĉ ne tremeto de l' aero.

— Li vere foriris ĉi-foje, mi kredas, — murmuris Sam. — Mi opinias, ke ĝuste ĉi tien li intencis gvidi nin. Golumo! Se iam mi metos la manojn al vi denove, vi tion bedaŭros.

Baldaŭ, palpante mallerte en la mallumo, ili konstatis, ke la maldekstra aperturo estas barita: aŭ ĝi estis ruzo aŭ iu ŝtonego falis en la koridoron.

— Tio ĉi ne povas esti la vojo, — Frodo flustris. — Prave aŭ malprave ni devos iri laŭ la alia.

— Kaj rapide! — Sam anhelis. — Io pli malbona ol Golumo proksimas. Mi sentas ion, kio rigardas nin.

Ili ne progresis pli ol kelkajn paŝojn, kiam de malantaŭe aŭdiĝis sono, timiga kaj terura en la peza remburita aero: gargara bobela bruo kaj longa malica siblo. Ili abrupte turniĝis sed nenio estis videbla. Ŝtone senmovaj ili staris, gapante, atendante ion nekonatan.

— Embusko! — diris Sam, kaj li metis manon sur la tenilon de sia glavo; kaj farante tion li pensis pri la mallumo en la tumulo, el kiu ĝi venis. "Mi volus, ke maljuna Tom estus nun apude!" — li pensis. Tiam, starante kun mallumo ĉirkaŭe kaj nigro de malespero kaj kolero en sia koro, ŝajnis al li, ke li vidas lumon: lumon en sia menso, unue preskaŭ netolereble brilan,

kiel sunradio al la okuloj de iu longe kaŝita en senfenestra ŝakto. Poste la lumo iĝis koloroj: verdo, oro, arĝento, blanko. Tre fore, kvazaŭ en bildeto desegnita de elfaj fingroj, li vidis la Damon Galadriela staranta sur la herbo en Lorieno, kaj en ŝiaj manoj estis donacoj. *Kaj vi, Ringoportanto*, li aŭdis ŝin diri, fore sed klare, *por vi mi preparis tion ĉi*.

La bobela siblo pliproksimiĝis, kaj aŭdiĝis grincado kvazaŭ de iu artikitaĵo, kiu moviĝus lantcele en la mallumo. Fetoro venis antaŭ ĝi.

— Mastro, mastro! — kriis Sam, kaj viglo kaj urĝo revenis al lia voĉo. — La donaco de l' Damo! La stelvitro! Lumo por vi en lokoj senlumaj, ŝi diris, ke tio ĝi estos. La stelvitro!

— Ĉu la stelvitro? — murmuris Frodo, kvazaŭ respondante el dormo, apenaŭ komprenante. — Nu, jes! Kial mi forgesis ĝin? *Lumo kiam ĉiuj aliaj lumoj estingiĝos*! Kaj nun vere nur lumo povos helpi nin.

Malrapide lia mano iris al lia sino, kaj malrapide li levis la Flakoneton de Galadriela. Dum momento ĝi ardis, malforta kiel supreniranta stelo baraktanta en pezaj terproksimaj nebuletoj, kaj poste kiam ĝia potenco plifortiĝis, kaj espero kreskis en la menso de Frodo, ĝi komencis fajri, kaj ĉendiĝis al arĝenta flamo, eteta kerno de blinduma lumo, kvazaŭ Erendilo mem descendus de la altaj sunsubiraj padoj kun la lasta Silmarilo sur la frunto. La mallumo cedis lokon al ĝi, ĝis ĝi ŝajnis brili en la centro de globo el aereca kristalo, kaj la mano ĝin tenanta flagris je blanka fajro.

Frodo gapis mirigite al tiu mirinda donaco, kiun li tiom longe portadis, ne diveninte ĝiajn plenajn valoron kaj potencon. Malofte li memoris pri ĝi survoje, ĝis ili venis al la Morgula Valo, kaj neniam li uzis ĝin pro timo pri ĝia riveliga lumo.

— *Aiya Eärendil Elenion Ancalima*! — li kriis kaj ne sciis, kion li prononcis; ĉar ŝajnis, ke alia voĉo parolis per la lia, klara, neĝenata de la fia aero en la ŝakto.

Sed aliaj potencoj troviĝas en Mez-Tero, potencoj de nokto, kaj ili estas malnovaj kaj fortaj. Kaj ŝi, kiu marŝis en la mallumo, aŭdis la elfojn krii tiun krion praprae en la tempoprofundoj, kaj tiam ŝi ignoris ĝin, kaj nun ĝi ne malkuraĝigis ŝin. Eĉ dum Frodo parolis, li sentis grandan malicon direktitan al li, kaj mortigeman rigardon taksantan lin. Ne malproksime en la tunelo, inter ili kaj la aperturo, kie ili ŝanceliĝis kaj stumblis, li konsciiĝis pri okuloj videbliĝantaj, du grandaj garboj de multfenestraj okuloj — la venonta atenco estis finfine senmaskigita. La radiado de la stelvitro estis frakasita kaj resendata de ties mil facetoj, sed malantaŭ la ekbrilo komencis arde interne iu pala mortigema fajro, flamo ĉendita en iu profunda ŝakto de misa pensado. Monstraj kaj abomenindaj estis tiuj okuloj, bestecaj kaj tamen plenaj je intenco kaj je hida ĝojeco, frandante sian predon jam

enfermitan sen ajna espero pri eskapo.

Frodo kaj Sam, hororfrapite, komencis malrapide retroiri, kun la propra rigardo kaptita de la terura gapado de tiuj misaŭguraj okuloj; sed dum ili retroiris, samtempe la okuloj venis antaŭen. La mano de Frodo hezitis, kaj malrapide la Flakoneto ekpendis. Tiam subite, liberigite de la retena sorĉo por iom kuri en vana paniko por amuzi la okulojn, ili ambaŭ turnis sin kaj fuĝis kune; sed dum ili kuris, Frodo retrorigardis kaj vidis terurite, ke la okuloj tuj saltante sekvis ilin. La fiodoro de morto nubece ĉirkaŭis ilin.

— Haltu, haltu! — li kriis febre. — Kurado ne utilas. La okuloj malrapide proksimiĝis.

— Galadriela! — li vokis, kaj strecante sian kuraĝon li ankoraŭfoje levis la Flakoneton. La okuloj haltis. Momente ties rigardo malstreĉiĝis, kvazaŭ ĝenus ilin ia svaga dubo. Tiam la koro de Frodo flamiĝis en li, kaj ne pensante pri la faro, ĉu tio estis stulto, malespero aŭ kuraĝo, li prenis per la maldekstra mano la Flakoneton, kaj per la dekstra li elingigis sian glavon. Pikilo ekflagris, kaj la akra elfa klingo ekbrilis en la arĝenta lumo, sed ĉe la eĝoj flagris blua fajro. Poste, tenante alte la stelon kaj kun la glavo antaŭ si, Frodo, hobito el la Provinco, marŝis senŝancele suben renkonte al la okuloj.

Tiuj hezitemis. Dubo aperis en ili, kiam la lumo proksimiĝis. Unu post unu ili malfortiĝis, kaj malrapide retiris sin. Neniu helo tiom terura iam antaŭe afliktis ilin. De suno kaj luno kaj steloj ili estis sekuraj sub la tero, sed nun stelo descendis en la teron mem. Daŭre ĝi proksimiĝis, kaj la okuloj ekŝanceliĝis. Unu post alia ili ĉiuj senlumiĝis; ili forturniĝis, kaj granda maso, ekster atingo de la lumo, ĵetis sian ombregon intere. Ili estis for.

— Mastro, mastro! — kriis Sam. Li proksimis malantaŭe, kun propra glavo elingigita kaj preta. — Je la steloj kaj gloro! Ja la elfoj faros el tio kanton, se iam ili aŭdos pri ĝi! Ke mi travivu por rakonti ĝin al ili kaj aŭdi ilian kantadon. Sed ne pluiru, mastro! Ne subiru al tiu fikuŝejo! Nun ni disponas pri la sola ebleco. Nun ni foriru el tiu ĉi fia truo!

Kaj sekve ili turniĝis ankoraŭfoje, unue marŝis kaj poste kuris; ĉar dum la iro, la tunela planko supreniris apike, kaj ĉiupaŝe ili grimpis pli alten super la fetorojn de l' nevidebla fikuŝejo, kaj forto revenis al la membroj kaj koroj. Sed daŭre la malamego de l' Rigardanto embuskis malantaŭe, provizore blinda eble, tamen nevenkita, plu celanta mortigon. Kaj nun venis renkonte al ili aerfluo, malvarma kaj maldensa. La aperturo, la tunela ekstremo, finfine troviĝis antaŭ ili. Anhele, sopirante al loko sentegmenta, ili ĵetis sin antaŭen; kaj poste ili mirigite ŝanceliĝis, retrostumblante. La eliron baris iu barilo, sed ne el ŝtono: mola kaj iom cedema ĝi ŝajnis, kaj tamen forta kaj nepenetrebla; aero trafiltriĝis, sed eĉ ne brileto de lumo. Ankoraŭfoje ili impetis antaŭen kaj estis reĵetitaj.

Alte tenante la Flakoneton, Frodo vidis antaŭ si grizecon, kiun la radiado de la stelvitro ne penetris kaj ne lumigis, kvazaŭ ĝi estus ombro, kiun, ĉar ne kreis ĝin lumo, nenia lumo povas forigi. Tra la larĝo kaj alto de la tunelo vasta araneaĵo estis teksita, orda kiel teksaĵo de iu granda araneo, sed pli dense teksita kaj multe pli granda, kaj ĉiu fadeno dika kiel ŝnurego.

— Araneaĵoj! — Sam ridis malafable. — Ĉu nur tio? Araneaĵoj! Tamen kia araneo! Ek al ili, suben ili!

Furioze li ekhakis ilin per sia glavo, sed la fadeno, kiun li frapis, ne rompiĝis. Ĝi iomete cedis kaj poste resaltis kiel liberigita pafarka ŝnureto, forturnante la klingon kaj suprenĵetante la brakon kaj la glavon. Trifoje Sam batis per sia tuta forto, kaj fine unu fadeno el la sennombraj fadenoj tratranĉiĝis kaj tordiĝis, kirliĝante kaj vipante tra la aero. Unu el ĝiaj ekstremaĵoj vipis la manon de Sam, kaj li ekkriis pro l' doloro, retrosaltante kaj metante la manon al la buŝo.

— Necesos tagoj por liberigi la vojon tiumaniere, — li diris. — Kion fari? Ĉu revenis tiuj okuloj?

— Ne, nevideblas, — diris Frodo. — Sed mi plu sentas, ke ili rigardas min aŭ pensas pri mi: eble pretigas novan planon. Se tiu ĉi lumo malleviĝus, aŭ se ĝi estingiĝus, ili rapide revenus.

— Kaptitaj en la fino! — amare diris Sam, dum lia kolero fortiĝis denove malgrau laco kaj malespero. — Kuloj en reto. La kondamno de Faramiro mordu tiun Golumon kaj mordu lin rapide!

— Tio jam ne helpus nin, — diris Frodo. — Ek! Ni vidu, kion kapablas Pikilo. Ĝi estas klingo elfa. Ekzistis araneaĵoj teruraj en la malhelaj ravinoj de Beleriando, kie ĝi estis forĝita. Sed vi devos esti gardanto kaj malhelpi revenon de l' okuloj. Jen, prenu la stelvitron. Ne timu. Alte tenu ĝin kaj sentinelu!

Poste Frodo alpaŝis la grandan grizan reton kaj hakis ĝin laŭ larĝa balaa frapo, trenante l' amaran eĝon rapide tra eskalo de denspendaj kordoj, kaj tuj forsaltis. La blubrila klingo traŝiris ilin kiel falĉilo herbon, kaj ili saltis kaj tordiĝis kaj poste pendis nestreĉite. Granda ŝiraĵo estis kreita.

Baton post bato li faris, ĝis fine la tuta teksaĵo en lia ĝisatingo estis frakasita, kaj la supra parto bloviĝis kaj skuiĝis kiel nefiksita vualo pro la envenanta venteto. La kaptilo estis rompita.

— Venu! — kriis Frodo. — Antaŭen! Antaŭen! — Sovaĝa ĝojo pro ilia eskapo el la faŭko mem de malespero subite plenigis lian tutan menson. Lia kapo turniĝis kvazaŭ pro gluto de fortega vino. Li trasaltis, kriante dum la irado.

Ŝajnis lume en tiu malhela lando al la okuloj, kiuj trapasis la fikuŝejon de nokto. La grandaj fumoj jam leviĝis kaj maldensiĝis, kaj pasis la lastaj

horoj de tago sombra; la ruĝa ardo de Mordoro jam formortis en subbrula ombreco. Tamen ŝajnis al Frodo, ke li rigardas matenon de subita espero. Preskaŭ li atingis la supraĵon de la muro. Nur iomete pli alten. La fendego Cirito Ungol estis antaŭ li, malklara noĉo en la nigra firsto, kaj la rokaj kornoj nigrumis sur la ĉielo ambaŭflanke. Mallonga vetkuro, sprintista distanco, post kiu li trapasos!

— Al la pasejo, Sam! — li kriis, malatentante la kriĉon de sia voĉo, kiu liberigite de la sufoka aero en la tunelo jam sonoris alte kaj senbride. — Al la pasejo! Kuru, kuru, kaj ni trapasos, trapasos antaŭ ol iu povos malhelpi nin!

Sam venis malantaŭe tiel rapide, kiel eblis urĝi la krurojn; sed kvankam li ĝojis esti libera, li estis maltrankvila, kaj dum li kuris, li ofte retrorigardis al la malhela arkaĵo de l' tunelo, timante vidi la okulojn, aŭ iun figuron neimageblan, elsaltintan persekute. Tro malmulte li kaj lia mastro konis la ruzon de Ŝeloba. Ŝi havis multajn elirojn el sia fikuŝejo.

Tie pralonge ŝi loĝis, malicaĵo en formo araneeca, ĝuste tia, kia antikve loĝis en la Lando de la Elfoj en tiu okcidento nun submara, kian Bereno kontraŭbatalis en la Montoj de Teruro en Doriato, kaj tiel alvenis Lutienan sur la verda herbejo inter la cikutoj antaŭlonge en la lunlumo. Kial Ŝeloba venis tien, fuĝante el ruino, rakontis neniu historio, ĉar el la Malhelaj Jaroj venis nur malmultaj rakontoj. Sed tamen tie troviĝis ŝi, kiu aperis tie antaŭ Saŭrono, kaj antaŭ la unua ŝtono de Baraduro; kaj ŝi servis neniun krom sin mem, trinkante la sangon de elfoj kaj homoj, pufiĝinte kaj grasiĝinte pro senfina kovado de siaj festenoj, teksante araneaĵojn el ombro; ĉar ĉiuj vivantoj estis ŝia nutraĵo, kaj ŝia vomo mallumo. Disvastigante ŝiajn malsuperajn kovaĵojn, bastardoj de l' mizeraj paruloj, la propraj idoj, kiujn ŝi mortigis, disiris de valo al valo, de Efelo Duad ĝis la orientaj montetoj, ĝis Dol Gulduro kaj la fortikaĵoj de Mornarbaro. Sed neniu povis rivali ŝin, Ŝeloban la Grandan, la lastan idon de Ungolianta, kiu ĝenis la malfeliĉan mondon.

Jam antaŭ jaroj Golumo vidis ŝin, Smeagolo kiu ŝteliris en ĉiujn malhelajn truojn, kaj li riverencis kaj adoris ŝin, kaj la malhelo de ŝia malica volo marŝis apud li laŭ ĉiuj vojoj de lia laceco, forbarante lin de lumo kaj de bedaŭro. Kaj li promesis alporti al ŝi manĝaĵon. Sed ŝia avido ne estis lia avido. Malmulton ŝi sciis aŭ zorgis pri turegoj, ringoj aŭ io ajn elpensita mense aŭ mane, kiu deziris nur morton al ĉiuj aliaj, mensan kaj korpan, kaj por si mem troabundon de vivo, sola, pufiĝinta, ĝis la montoj ne plu povus subteni ŝin kaj la mallumo ne povus limigi ŝin.

Sed tiu deziro estis ankoraŭ malproksima, kaj longe jam ŝi estis malsata, embuskante en sia fikuŝejo, dum kreskis la potenco de Saŭrono, kaj lumo

kaj vivantoj forlasis lian terenon; kaj la urbo en la valo estis morta, kaj proksimiĝis neniu elfo aŭ homo, nur la malfeliĉaj orkoj. Nutraĵo malbonkvalita kaj singardema. Sed ŝi devis manĝi, kaj, kiam malgraŭ fortostreĉo ili elfosis novajn serpentumajn koridorojn el la pasejo kaj el sia turego, ĉiam ŝi trovis metodon por kapti ilin. Sed ŝi avidis manĝaĵon pli dolĉan. Kaj Golumo kondukis ĝin al ŝi.

— Ni vidos, ni vidos, — li diris ofte al si, kiam malica humoro plenigis lin, dum li iris la danĝeran vojon de Emin Muilo ĝis la valo Morgul, — ni vidos. Eble okazos, ho jes, eble okazos, ke, kiam ŝi forĵetos la ostojn kaj la malplenajn vestaĵojn, ni trovos ĝin, ni akiros ĝin, la Trezoron, kompensaĵon por kompatinda Smeagolo, kiu alportas agrablan manĝaĵon. Kaj ni savos la trezoron, kiel ni promesis. Ho jes. Kaj kiam ni havos ĝin sekure, tiam ŝi scios tion, ho jes, tiam ni repagos ŝin, mia trezoro. Tiam ni repagos al ĉiuj!

Tiel li pensis en interna ĉambro de sia ruzeco, kiun li ankoraŭ esperis kaŝi de ŝi, eĉ kiam li venis al ŝi denove kaj riverencis profunde antaŭ ŝi, dum liaj kunuloj dormis.

Saŭrono sciis, kie ŝi embuskas. Plaĉis al li, ke ŝi loĝas tie malsata sed ne malpli malica, pli certa gardanto sur tiu antikva pado en lian landon ol iu ajn alia, kiun povus elpensi lia lerto. Kaj orkoj estis utilaj sklavoj, sed li havis ilin abunde. Se de tempo al tempo Ŝeloba kaptis ilin por mildigi sian malsaton, li ne domaĝis tion: li povis malhavi ilin. Kaj kelkfoje, kiel homo kiu ĵetas frandaĵon al sia kato (*sia kato* li nomis ŝin, sed ŝi ne agnoskis lin), Saŭrono sendis al ŝi kaptitojn, por kiuj li ne havis alian uzeblecon: li peligis ilin al ŝia truo kaj ordonis raporti al li la ludon, kiun ŝi elpensis.

Tiel ili ambaŭ vivis, ĝojante pri la propraj amuzaĵoj, kaj timis neniun atakon, nek koleron, nek iun ajn finon de sia malico. Neniam ĝis nun eskapis muŝo el la araneaĵoj de Ŝeloba, kaj tiom pli grandaj nun estis ŝiaj agitiĝo kaj kolero.

Sed neniom pri tiu malico, kiun ili stimulis kontraŭ si, sciis kompatinda Sam, krom ke timo fortiĝas en li, minaco, kiun li ne povis vidi; kaj tiom peza fariĝis tio, ke kuri estis por li ŝarĝo, kaj liaj piedoj ŝajnis plumbaj.

Teruro ĉirkaŭis lin, kaj malamikoj estis antaŭ li en la pasejo, kaj lia mastro fantazihumore kuradis senpripense renkonte al ili. Forturnante siajn okulojn de la ombro malantaŭa kaj la profunda morno sub la klifo maldekstre, li rigardis antaŭen, kaj du aferojn li vidis, kiuj fortigis lian konsternon. Li vidis, ke la glavo, kiun Frodo plu tenis elingigite, briletas je blua flamo; kaj li vidis, ke la fenestro en la turego ankoraŭ ardas ruĝe.

— Orkoj! — li murmuris. — Ni neniam preteriros tiamaniere. Orkoj ĉeestas, kaj pli malbonaj ol orkoj.

Reirante haste al sia longedaŭra kutimo de sekreteco, li fermis sian

manon ĉirkaŭ la valora Flakoneto, kiun li ankoraŭ portis. Ruĝa pro lia propra viva sango, lia mano momente ekbrilis, kaj poste li ŝovis la rivelan lumon profunde en poŝon proksiman al sia sino kaj volvis sin en sia elfa mantelo. Nun li provis rapidigi siajn paŝojn. Lia mastro distanciĝis de li; jam li estis antaŭa ĉirkaŭ dudek paŝojn, flirtante plu kvazaŭ ombro; baldaŭ li ne plu videblos en tiu mondo griza.

Apenaŭ Sam kaŝis la lumon de la stelvitro, jam ŝi venis. Iomete antaŭe kaj maldekstre li subite vidis, eliĝantan el nigra ombrotruo sub la klifo, la plej abomenindan figuron, kiun li iam rigardis, naŭzegan pli ol la teruro de malbonega sonĝo. Ŝi plej similis araneon, sed pli granda ol la grandaj ĉasbestoj, kaj pli timiga ol ili pro la malica intenco en ŝiaj senkompataj okuloj. Tiuj samaj okuloj, kiujn li supozis timigitaj kaj venkitaj, jen ili lumis denove je lumo misaŭgura, grapolitaj sur ŝia antaŭenŝovita kapo. Grandajn kornojn ŝi havis, kaj malantaŭ ŝia mallonga tigsimila kolo estis ŝia grandega ŝvelinta korpo, vasta pufa sako, balanciĝanta kaj sinkanta inter ŝiaj kruroj; ĝia granda supro estis nigra, makulita per grizaj makuloj, sed la ventro sube estis pala kaj fosforeska kaj eligis fiodoron. Ŝiaj kruroj estis kurbaj, kun grandaj nodaj artikoj super ŝia dorso, kaj kun haroj kiuj elstaris ŝtalpikile, kaj ĉe la ekstremo de ĉiu kruro estis pinĉilo.

Tuj kiam ŝi elpuŝis sian molan plaŭdan korpon kaj la kunfalditajn membrojn el la supera eliro de sia fikuŝejo, ŝi moviĝis terure rapide, jen kurante sur la grincaj kruroj, jen farante subitan salton. Ŝi estis inter Sam kaj ties mastro. Aŭ ŝi ne vidis Samon, aŭ ŝi provizore evitis lin kiel lumportinton, kaj direktis sian tutan intencon al unu predo, al Frodo senigita de sia Flakoneto, kuranta senatente laŭ la pado, ankoraŭ senscia pri sia danĝero. Rapide li kuris, sed Ŝeloba pli rapidis; post kelkaj saltoj ŝi kaptos lin.

Sam anhelis kaj kolektis la tutan restantan spiron por krii.

— Gardu vin malantaŭe! — li kriegis. — Atentu, mastro! Mi estas... — sed subite lia krio estis sufokita.

Longa malseketa mano kovris lian buŝon kaj la alia kaptis lian kolon, dum io volviĝis ĉirkaŭ lian kruron. Surprize kaptite li falis malantaŭen en la brakojn de l' atakinto.

— Kaptis lin! — siblis Golumo kontraŭ lia orelo. — Fine, mia trezoro, ni kaptis lin, jes, la malafablan hobiton. Ni prenas ĉi tiun. Ŝi prenos la alian. Ho jes, Ŝeloba prenos lin, ne Smeagolo: li promesis; li tute ne dolorigos la mastron. Sed vin li havas, vi, malafabla fia ŝteliranto! — Li kraĉis sur la nukon de Sam.

Furiozo pro la perfido kaj feroco pro la malhelpo, kiam lia mastro estis en mortdanĝero, havigis al Sam subitajn perfortemon kaj forton pli grandajn

ol Golumo atendis de tiu malhasta stulta hobito, kia supozis lin Golumo. Eĉ Golumo mem ne povus pli rapide aŭ pli feroce tordi sin. Lia teno sur la buŝo de Sam ekglitis, kaj Sam ekkaŭris kaj ree ŝoviĝis antaŭen, klopodante forŝiri sin de la kroĉo ĉe lia kolo. Lia glavo estis ankoraŭ en la mano, kaj sur lia maldekstra brako, pendante sur ŝnureto, estis la bastono de Faramiro. Feroce li provis turni sin kaj trapiki sian malamikon. Sed Golumo pli rapidis. Lia longa brako elŝoviĝis, kaj li kroĉis la manradikon de Sam: liaj fingroj similis ŝraŭbtenilon; malrapide kaj senkompate li kurbigis malsupren kaj antaŭen la manon, ĝis dolorkrie Sam malkroĉis la glavon kaj ĝi falis teren; kaj la tutan tempon la alia mano de Golumo pli forte premis la gorĝon de Sam.

Tiam Sam provis sian lastan trukon. Per sia tuta forto li fortiris sin kaj firme starigis siajn piedojn; poste li subite puŝegis siajn krurojn kontraŭ la teron kaj tutpotence ĵetis sin malantaŭen.

Ne atendinte de Sam eĉ tiun simplan trukon, Golumo falis kun Sam supre, kaj li ricevis la tutan pezon de l' fortika hobito sur sian ventron. Akra siblo eliĝis el li, kaj momente lia mano ĉe la gorĝo de Sam malstriktiĝis; sed liaj fingroj daŭre tenis la glavon. Sam ŝiris sin antaŭen kaj foren, kaj stariĝis, kaj poste li giris dekstren, pivote laŭ la manradiko tenata de Golumo. Kaptinte la bastonon per sia maldekstra mano, Sam svingis ĝin supren, kaj jen ĝi descendis kun fajfa klako sur la etenditan brakon de Golumo, tuj sub la kubuto.

Kriĉe Golumo malkroĉiĝis. Tiam Sam atakis; sen paŭzo por transdoni la bastonon de maldekstre dekstren li faris alian sovaĝan baton. Serpentrapide Golumo glisis flanken, kaj la bato celinta lian kapon trafis lian dorson. La bastono rompiĝis. Tio sufiĉis al li. Kroĉiĝo de malantaŭe estis malnova manovro lia, kaj malofte li malsukcesis pri tio. Sed ĉi-foje erarigita de malico, li maltrafe parolis kaj frandumis antaŭ ol ambaŭ manoj kaptis la kolon de l' viktimo. Lia bela plano tute fuŝiĝis, kiam tiu abomena lumo tiel neatendite aperis en la mallumo. Kaj nun li frontis furiozan malamikon ne multe pli malgrandan ol li. Tiu ĉi lukto ne konvenis al li. Sam fulmrapide levis de la tero sian glavon kaj suprenigis ĝin. Golumo kriĉis kaj saltinte flanken li kvarpiede foriĝis per unu raneca saltego. Antaŭ ol Sam povis atingi lin, li foriris, kurante mirinde rapide reen al la tunelo.

Glavenmane Sam sekvis lin. Momente li forgesis ĉion alian krom la ruĝa furiozo en sia cerbo kaj la deziro mortigi Golumon. Sed antaŭ ol li povis atingi lin, Golumo estis for. Tiam dum la senluma trao estis antaŭ li kaj la fiodoro eliĝis renkonte al li, penso pri Frodo kaj la monstro tondrobate trafis la menson de Sam. Li turnis sin kaj kuregis ekscitite laŭ la pado, ĉiam denove vokante la nomon de sia mastro. Sed tro malfrue.

Tiugrade la insido de Golumo prosperis.

10

La alternativo de Mastro Samsaĝo

Frodo kuŝis dorsaltere, kaj la monstro kliniĝis super li, tiel koncentrita al sia viktimo, ke ŝi malatentis Samon kaj ties kriojn, ĝis li tre proksimis. Alkuregante li vidis, ke Frodo estas jam ligita per ŝnuroj, ĉirkaŭvolvita de maleoloj ĝis ŝultroj, kaj la monstro per siaj grandaj antaŭkruroj komencas duonlevi, duontreni for lian korpon.

Proksime de li kuŝis, brilanta sur la tero, lia elfa klingo, kie ĝi falis senutila el lia mano. Sam ne atendis por cerbumi, ĉu li estas kuraĝa, lojala aŭ kolera. Li saltis antaŭen kriante kaj kroĉis la glavon de l' mastro per la maldekstra mano. Poste li atakis. Neniun atakon pli ferocan iam atestis la sovaĝa mondo de la bestoj, kie iu furioza kreaĵeto armita per etaj dentoj, sola, volonte alsaltas turon el korno kaj felo, kiu staras super ĝia falinta parulino.

Perturbite kvazaŭ dum franda revo per lia krieto, ŝi turnis malrapide la teruran malicon de sia rigardo al li. Sed preskaŭ antaŭ ol ŝi konstatis, ke atakas ŝin furiozo pli granda ol iu ajn, kiun ŝi konis dum sennombraj jaroj, la brila glavo mordis ŝian piedon kaj fortranĉis la pinĉilon. Sam ensaltis en la arkaĵon de ŝiaj kruroj, kaj per vigla suprenŝovo de l' alia mano alpikis la grapolajn okulojn sur ŝia klinita kapo. Unu okulego estingiĝis.

Nun la impertinentulo estis rekte sub ŝi, momente neatingebla per ŝia pikilo kaj ŝiaj pinĉiloj. Ŝia ventrego estis super li kun sia putra lumo, kaj ties fetoro preskaŭ terenbatis lin. Tamen lia furiozo restis por ankoraŭ unu bato, kaj antaŭ ol ŝi povis sinki sur lin, sufokante lin kaj lian tutan impertinentan etan kuraĝon, li tranĉostrekis la brilan elfan klingon trans ŝin kun senespera forto.

Sed Ŝeloba ne estis drakeca, al ŝi mankis parto pli mola ol nur ŝiaj okuloj. Nodoza kaj kavetoza pro putriĝo estis ŝia pramalnova felo, sed daŭre densigita de interne per tavolo post tavolo da fikreskaĵo. La klingo strekis sur ĝi teruran tranĉon, sed tiuj hidaj faldaĵoj ne estis penetreblaj per ajna homa forto, eĉ se elfo aŭ gnomo forĝus la ŝtalon aŭ la mano de Bereno aŭ de Turino svingus ĝin. Ŝi cedis al la bato, kaj poste ŝi levegis la grandan sakon de sia ventro alten super la kapo de Sam. Veneno ŝaŭmis kaj bobelis el la vundo. Dismetinte siajn krurojn, ŝi subenŝovis sian enorman bulaĵon al li denove. Tro baldaŭ. Ĉar Sam ankoraŭ staris kaj, lasinte fali sian propran glavon, li per ambaŭ manoj tenis la elfan klingon pintalsupre por forbari

tiun naŭzan tegmenton; kaj tial Ŝeloba pro la pela potenco de la propra kruela volo, per forto pli granda ol ajna soldata mano, ŝovis sin sur la fatalan pikilon. Profunden, profunden ĝi pikis, dum Sam estis malrapide premata teren.

Tian doloregon Ŝeloba neniam spertis, aŭ prisonĝis, en la tuta longa mondo de sia malicego. Ne la plej brava soldato el antikva Gondoro, nek la plej sovaĝa kaptita orko, iam ajn frontis ŝin aŭ pikis al ŝia amata karno. Trapasis ŝin tremego. Ree levegante sin, fortirante sin de la doloro, ŝi kurbigis sub si la tordiĝantajn membrojn kaj konvulsie retrosaltegis.

Sam estis surgenua apud la kapo de Frodo, liaj sentumoj kirliĝis pro la fiodoro, dum liaj du manoj daŭre tenis la glavon. Tra la nebulo antaŭ siaj okuloj li malklare konsciis pri la vizaĝo de Frodo, kaj li obstine strebis regi sin kaj sin treni el la sveno, kiu minacis lin. Malrapide li levis sian kapon kaj vidis ŝin, nur kelkajn paŝojn for, okulumanta lin, dum ŝia beko gutigis sputon de veneno, kaj verda ŝlimo fluetis de sub ŝia vundita okulo. Tie ŝi kaŭris, la tikega ventro disŝovita sur la tero, la grandaj arkaĵoj de ŝiaj kruroj tremetantaj, dum ŝi kuntiriĝis por nova salto — ĉi-foje por premi kaj piki ĝismorte: neniu mordeto de veneno por senmovigi la baraktadon de ŝia viando; ĉi-foje por mortigi kaj disŝiri.

Ĝuste kiam Sam mem ekkaŭris, rigardante ŝin, vidante sian morton en ŝiaj okuloj, venis al li ekpenso, kvazaŭ parolus iu fora voĉo, kaj li palpserĉis en sia sino per la maldekstra mano, kaj trovis tion, kion li serĉis: malvarma, malmola kaj solida ĝi ŝajnis laŭ lia tuŝo en fantoma mondo de teruro, la Flakoneto de Galadriela.

— Galadriela! — li diris feble, kaj tiam li aŭdis voĉojn malproksimajn tamen klarajn: la kriadon de la elfoj promenantaj sub la steloj en la amataj ombroj de la Provinco kaj la muzikon de la elfoj, kiel tiu penetris lian dormon en la Halo de Fajro en la domo de Elrondo.

Gilthoniel A Elbereth!

Kaj tiam lia lango malligiĝis, kaj lia voĉo kriis en la lingvo, kiun li pe konis:

A Elbereth Gilthoniel
o menel palan-díriel,
le nallon sí di'nguruthos!
A tiro nin, Fanuilos!

Kaj post tio li ŝanceliĝe stariĝis kaj denove iĝis hobito Samsaĝo, filo de Hamfasto.

— Nun venu, fiputraĵo! — li kriis. — Vi damaĝis mian mastron, bruto,

kaj tion vi kompensos. Ni pluiros; sed unue ni ekvilibrigos la konton ĉe vi. Venu, kaj gustumu ĝin denove.

Kvazaŭ lia nevenkebla spirito funkciigus ĝian potencon, la vitro subite flamis en lia mano kiel blanka torĉo. Ĝi flamis kiel stelo, kiu saltante el la firmamento brogas la malhelan aeron per lumo netolerebla. Neniu teraŭjo el la ĉielo iam pli frue brulis antaŭ la vizaĝo de Ŝeloba. Ties radioj eniris ŝian vunditan kapon kaj trastrekis ĝin netolerebla doloro, kaj la timiga luminfekto disvastiĝis de okulo al okulo. Ŝi retrofalis batante la aeron per siaj antaŭkruroj, ŝia vido estis eksplodita pro internaj fulmoj, ŝia menso agonia. Poste, forturninte sian vunditan kapon, ŝi ruliĝis flanken kaj komencis rampi, pinĉilon post pinĉilo, al la aperturo en la malhela klifo malantaŭe.

Sam pluiris. Li ŝanceliĝis kiel ebriulo, sed li iris antaŭen. Kaj Ŝeloba finfine senkuraĝigita, ŝrumpinta en malvenko, tikegis kaj tremis, dum ŝi klopodis forrapidi de li. Ŝi alvenis la truon, kaj kuntiriĝinte, postlasante spuron el verda-flava ŝlimo, ŝi englisis, ĝuste kiam Sam svingis lastan baton al ŝiaj treniĝaj kruroj. Poste li falis teren.

Ŝeloba estis for; kaj ĉu ŝi restis longe en sia fikuŝejo, vartante sian malicon kaj sian mizeron, kaj dum la lantaj jaroj de mallumo kuracis sin de interne, rekonstruante siajn grapolajn okulojn, ĝis kun malsato mortsimila ŝi denove ŝpinis siajn terurajn kaptilojn en la valoj de la Montoj de Ombro, tion ne rakontas tiu ĉi historio.

Sam restis sola. Lacege, dum la vespero de l’ Sennoma Lando trafis la lokon de la batalo, li rampis reen al sia mastro.

— Mastro, kara mastro, — li diris, sed Frodo ne parolis. Kiam li kuris antaŭen, entuziasma, ĝoja pri sia libereco, Ŝeloba hide rapide venis malantaŭ li kaj per unu ekbato pikis lin en la kolo. Li kuŝis nun pala, kaj aŭdis neniun voĉon, kaj ne moviĝis.

— Mastro, kara mastro! — diris Sam kaj atendis dum longa silento, aŭskultante vane.

Poste kiel eble plej rapide li fortranĉis la ligantajn ŝnurojn kaj kuŝigis sian kapon sur la bruston de Frodo kaj al ties buŝo, sed neniun vivmoviĝon li povis trovi, nek sentis plej feblan tremeton de la koro. Ofte li frotis la manojn kaj piedojn de sia mastro, kaj tuŝis lian frunton, sed ili estis malvarmaj.

— Frodo, sinjoro Frodo! — li vokis. — Ne lasu min sola ĉi tie! Vokas via Sam. Ne iru, kien mi ne povos sekvi! Vekiĝu, sinjoro Frodo! Ho vekiĝu, Frodo, kara mia, kara mia. Vekiĝu!

Poste kolero inundis lin, kaj li ĉirkaŭkuris la korpon de sia mastro furioze, pikante la aeron, batante la ŝtonojn kaj kriante defiojn. Baldaŭ li

revenis, kaj kliniĝinte rigardis la vizaĝon de Frodo, palan sub li en la krepusko. Subite li konstatis, ke li estas en tiu bildo, kiu estis vidigita al li en la spegulo de Galadriela en Lorieno: Frodo kun pala vizaĝo kuŝanta profunde dorma sub alta malhela klifo. Aŭ tiam li supozis profunde dorma.

— Li mortis! — li diris. — Ne dormas, sed mortis! — kaj dum li diris tion, kvazaŭ la vortoj efikigus denove la venenon, al li ŝajnis, ke la vizaĝo iĝis grize verda.

Kaj tiam trafis lin nigra senespero, kaj Sam kliniĝis al la tero, kaj tiris sian grizan kapuĉon sur la kapon, kaj nokto venis al lia koro, kaj nenion pli li konsciis.

Kaj kiam finfine pasis la nigreco, Sam suprenrigardis, kaj ombroj ĉirkaŭis lin; sed dum kiom da minutoj aŭ horoj la mondo treniĝis plu, li ne sciis. Li estis ankoraŭ en la sama loko, kaj ankoraŭ lia mastro kuŝis mortinta apud li. La montoj ne jam diseriĝis, nek la tero ruiniĝis.

— Kion mi faru, kion mi faru? — li diris. — Ĉu mi akompanis lin tra la tuta vojaĝo vane? — kaj tiam li rememoris sian propran voĉon, dirinta la vortojn, kiujn tiumomente li mem ne komprenis, komence de ilia vojaĝo: *Ion mi devas fari antaŭ la fino. Mi devas ĝisfini ĝin, sinjoro, se vi min komprenas*.

— Sed kion mi povas fari? Certe ne lasi sinjoron Frodo mortinta, neentombigita supre de la montoj, kaj iri hejmen, ĉu? Aŭ pluiri? Ĉu pluiri? — li ripetis, kaj dum momento skuis lin dubo kaj timo. — Ĉu pluiri? Ĉu tion mi devos fari? Kaj forlasi lin, ĉu?

Tiam finfine li komencis plori; kaj irante al Frodo li ordigis ties korpon, kaj kunmetis la malvarmajn manojn sur lia brusto, kaj volvis lin en lia mantelo; kaj li kuŝigis la propran glavon unuflanke kaj la bastonon donacitan de Faramiro aliflanke.

— Se mi devos pluiri, tiam mi devos kunpreni vian glavon, laŭ via permeso, sinjoro Frodo, sed mi metos tiun ĉi ĉe via flanko, kiel ĝi kuŝis flanke de l’ malnova reĝo en la dolmeno; kaj vi havas vian belan mitrilan veston de maljuna sinjoro Bilbo. Kaj vian stelvitron, sinjoro Frodo, vi ja pruntedonis al mi, kaj mi bezonos ĝin, ĉar ĉiam de nun mi estos en mallumo. Ĝi estas tro valora por mi, kaj la Damo donacis ĝin al vi, sed eble ŝi komprenos. Ĉu komprenas *vi*, sinjoro Frodo? Mi devos pluiri.

Sed iri li ne povis, ankoraŭ ne. Li genuiĝis kaj tenis la manon de Frodo kaj ne povis liberigi ĝin. Kaj la tempo pasis kaj daŭre li genuis, tenante la manon de sia mastro, kaj debatante en sia koro.

Nun li klopodis trovi forton por forŝiri sin kaj iri solecan vojaĝon al venĝo. Se entute li povus iri, lia kolero portus lin sur ĉiuj vojoj de la mondo, persekute, ĝis li trovus finfine lin: Golumon. Tiam Golumo mortus en

angulo. Sed li ekvojaĝis ne por fari tion. Ne valorus forlasi sian mastron por tio. Tio ne revenigus lin. Nenio tion kapablus. Prefere ili ambaŭ estu mortaj kune. Kaj ankaŭ tio estis vojaĝo soleca.

Li rigardis la brilan pinton de la glavo. Li pensis pri tiuj lokoj, malantaŭ kiuj estas nigra limo kaj falo en neniecon. Ne eblis eskapi tiuvoje. Tio estus fari nenion, eĉ ne funebri. Li ekvojaĝis ne por tio.

— Kion do mi devas fari? — li denove kriis, kaj jam li ŝajnis konstati la malfacilan respondon: *daŭrigi ĝis la fino*. Alia soleca vojaĝo, kaj la plej malbona.

— Kio? Ĉu mi, sola, iru ĝis la Fendaĵo de Sorto kaj tiel plu? — li hezitis ankoraŭ, sed la decidemo kreskis. — Kio? Ĉu *mi* forpenu la Ringon de *li*? Ĝin al li donis la Konsilio.

Sed tuj venis la respondo: “Kaj la Konsilio donis al li kunulojn, por ke la komisio ne malsukcesu. Kaj vi estas la lasta el la Kurmlaro. Ne devas malsukcesi la komisio”.

— Mi volus ne esti la lasta, — li ĝemspiris. — Mi volus, ke estu ĉi tie maljuna Gandalfo aŭ iu. Kial mi restas sola por decidi? Mi certe eraros. Kaj ne estas mia tasko portadi la ringon, ŝovante min antaŭen.

— Sed vi ne ŝovis vin antaŭen; vi estas ŝovita antaŭen. Kaj koncerne tion, ke vi ne estas la ĝusta kaj konvena persono, vidu, sinjoro Frodo ne estis, oni povus diri, nek sinjoro Bilbo. Ili ne elektis sin.

— Nu bone, mi devas decidi mem. Mi tion faros. Sed mi certe eraros: tio estus tipe de Sam Vato. Mi pripensu: se ĉi tie ni estos trovitaj, aŭ sinjoro Frodo estos trovita, kaj tiu Aĵo estos ĉe li, nu, la Malamiko akiros ĝin. Kaj tiel finiĝos ni ĉiuj, kaj Lorieno, kaj Rivendelo, kaj la Provinco kaj ĉio. Kaj la tempo urĝas, aŭ estos ĉiuokaze la fino. La milito komenciĝis, kaj pli ol probable la aferoj jam favoras la Malamikon. Ne eblas reiri kun Ĝi kaj serĉi konsilon aŭ permeson. Ne, aŭ sidi ĉi tie ĝis ili venos kaj mortigos min sur la korpo de la mastro, kaj akiros Ĝin; aŭ preni Ĝin kaj foriri. — Li profunde enspiris. — Do preni Ĝin!

Li kliniĝis. Tre malabrupte li malligis la agrafon ĉe la kolo kaj glitigis sian manon sub la tunikon de Frodo; alimane levante la kapon li kisis la malvarman frunton, kaj milde forigis trans ĝin la ĉeneton. Kaj poste la kapo denove kuŝis trankvile. Neniu ŝanĝiĝo okazis sur la senmova vizaĝo, kaj pro tio pli ol pro ĉiuj aliaj signoj Sam finfine konvinkiĝis, ke Frodo mortis kaj flankenmetis la Serĉadon.

— Adiaŭ, mastro, mia kara! — li murmuris. — Pardonu vian Sam. Li revenos al tiu ĉi loko, kiam la tasko estos plenumita, se li tion kapablos. Kaj poste li ne plu forlasos vin. Ripozu kviete, ĝis mi revenos, kaj neniu fibesto proksimiĝu al vi! Kaj se la Damo povus aŭdi min kaj realigi ankoraŭ unu

deziron, mi dezirus reveni kaj retrovi vin. Adiaŭ!

Poste li klinis sian propran nukon, kaj surmetis la ĉeneton, kaj tuj lia kapo estis klinita al la tero pro la pezo de la Ringo, kvazaŭ granda ŝtono estus pendigita al li. Sed malrapide, kvazaŭ la pezo malpliiĝus, aŭ nova forto kreskus en li, li levis la kapon, kaj poste per granda fortostreĉo li stariĝis kaj konstatis, ke li povas marŝi kaj porti sian ŝarĝon. Kaj momente li levis la Flakoneton kaj subenrigardis al sia mastro, kaj la lumo brilis jam milde laŭ la malabrupta radiado de l' vespera stelo dum somero, kaj en tiu lumo la vizaĝo de Frodo iĝis ree bela, pala tamen bela laŭ belo elfa, kvazaŭ de iu, kiu jam delonge trapasis la ombrojn. Kaj kun la maldolĉa konsolo de tiu lasta vido Sam turniĝis kaj kaŝis la lumon kaj stumblis antaŭen en la profundiĝantan malhelon.

Ne necesis, ke li iru longan distancon. La tunelo estis iom malantaŭe; la Fendo ducent paŝojn antaŭe aŭ malpli. La pado videblis en la krepusko, profunda vojsulko elfosita pro epokoj de trapaso, nun malapike supreniris kiel longa kavo kun klifoj ambaŭflanke. La kavo rapide mallarĝiĝis. Baldaŭ Sam alvenis longan aron de larĝaj malprofundaj ŝtupoj. Jam la orka turego estis rekte super li, brovumanta nigre, kaj en ĝi ardis la ruĝa okulo. Nun li estis kaŝita en la ombroj sub ĝi. Li proksimiĝis al la supro de la ŝtupoj kaj estis finfine en la Fendo.

— Mi decidis, — li ripetadis al si. Sed li ne findecidis. Kvankam li faris sian plejeblon trapensi ĉion, tio kion li faris tute kuspis lian naturon, kaj li murmuris: — Ĉu mi faris erare? Kion mi devis fari?

Kiam la apikaj flankoj de la Fendo ĉirkaŭfermis lin, antaŭ ol li alvenis la efektivan supraĵon, antaŭ ol li rigardis finfine la padon subirantan al la Sennoma Lando, li turnis sin. Dum momento, senmova en netolerebla dubemo, li retrorigardis. Li povis ankoraŭ vidi, kiel etan makulon en la profundiĝanta morno, la elirejon de la tunelo; kaj ŝajnis al li, ke li vidas aŭ divenas la kuŝlokon de Frodo. Li supozis, ke tie sube estas ekbrileto sur la tero, aŭ eble tio estis ia trompo pro liaj larmoj, kiam li gvatis el tiu alta loko ŝtonoza, kie lia vivo ruiniĝis.

— Se mi nur povus realigi mian solan deziron, — li suspiris, — reiri kaj retrovi lin! — Poste li finfine sin turnis al la vojo antaŭe kaj iris kelkajn paŝojn, la plej pezajn kaj plej nevolontajn, kiujn li iam faris.

Nur kelkajn paŝojn; kaj jam nur kelkajn pliajn kaj li subeniros kaj neniam plu vidos tiun altan lokon. Kaj tiam subite li aŭdis kriojn kaj voĉojn. Orkajn voĉojn. Li staris ŝtone senmova. Orkoj estis malantaŭ li kaj antaŭ li. Bruo de batantaj piedoj kaj raŭkaj krioj: orkoj proksimiĝis al la Fendo de la fora flanko, eble el iu enirejo de la turego. Piedbatoj kaj krioj malantaŭe. Li rapide turniĝis. Li vidis ruĝajn lumetojn, torĉojn, palpebrumantajn tie sube,

kiam ili eliris el la tunelo. Finfine persekutado komenciĝis. La ruĝa okulo de la turego ne estis blinda. Li estis kaptota.

Jam la flagro de venantaj torĉoj kaj la tinto de ŝtalo antaŭe estis tre proksimaj. Post minuto ili alvenos kaj atingos lin. Tro longe li hezitadis decidiĝe, kaj jam tio estis superflua. Kiel li povus eskapi, aŭ savi sin, aŭ savi la Ringon? La Ringon. Li ne konsciis pri penso aŭ decido. Li simple trovis, ke li eltiras la ĉeneton kaj enmanigas la Ringon. La ĉefo de la orka bando aperis en la Fendo antaŭ li. Tiam li surfingrigis ĝin.

La mondo ŝanĝiĝis, kaj unuopa tempero estis plenigita de horo da pensado. Tuj li konstatis, ke aŭdado pliakriĝis, dum vidado malklariĝis, sed alie ol en la fikuŝejo de Ŝeloba. Ĉio ĉirkaŭ li nun estis ne malhela, sed malpreciza; dum li mem troviĝis en griza nebula mondo, sola, kvazaŭ nigra solida roketo, kaj la Ringo, subenpremanta lian maldekstran manon, similis globon el varmega oro. Li tute ne sentis sin nevidebla; kaj li sciis, ke serĉas lin la Okulo.

Li aŭdis krakon de ŝtono kaj la murmuron de akvo malproksime en la Morgula Valo; kaj forprofunde sub la roko la bobelan mizeron de palpanta Ŝeloba, vojperdinta en iu senluma koridoro; kaj voĉojn en karceroj de la turego; kaj la kriojn de orkoj venantaj el la tunelo; kaj surdige muĝantajn en liaj oreloj, batadon de la piedoj kaj ŝiran bruegon de la orkoj antaŭ li. Li kuntiriĝis al la klifo. Sed ili marŝis supren kiel bando fantoma, grizaj distorditaj figuroj en nebulo, nur sonĝaĵoj el timo kun palaj flamoj en la manoj. Kaj ili preterpasis lin. Li kaŭris, provante forrampi en iun fendon por kaŝi sin.

Li aŭskultis. La orkoj eltunelaj kaj la aliaj subenmarŝantaj jam ekvidis unuj aliajn, kaj ambaŭ partioj nun rapidis kaj kriis. Li klare aŭdis ambaŭ, kaj li komprenis, kion ili diras. Eble la Ringo havigis komprenon de lingvoj, aŭ simple komprenon, precipe pri la servantoj de ĝia kreinto Saŭrono, tiel ke se li atentis, li komprenis kaj tradukis por si la pensojn. Certe la potenco de la Ringo ege plifortiĝis apud la lokoj de ĝia forĝado; sed unu aferon ĝi ne havigis, kaj tiu estis kuraĝo. Aktuale Sam ankoraŭ pensis nur pri sinkaŝado, pri nevidateco ĝis ĉio ree kvietos; kaj li aŭskultis maltrankvile. Li ne povis diveni, kiel proksimaj estas la voĉoj, la vortoj ŝajnis preskaŭ enorelaj.

— Hola! Gorbago! Kion vi faras ĉi tie? Ĉu jam sufiĉis al vi milito?

— Ordonite, vi plumpulo. Kaj kion faras vi, Ŝagrato? Ĉu laciĝis pri embuskado tie supre? ĉu ekemas descendi por batali?

— Ordonite al vi. Mi komandas tiun ĉi pasejon. Do parolu ĝentile. Kion vi raportas?

— Nenion.

— Haj! haj! joj! — Krio interrompis la interparolon de la estroj. La

orkoj pli sube subite vidis ion. Ili ekkuris. Tion faris ankaŭ la aliaj.

— Haj! Hola! Jen io! Kuŝas meze de la vojo. Spiono, spiono! — aŭdiĝis ululo de graŭlaj kornoj kaj babelo da blekantaj voĉoj.

Per terura bato Sam estis vekita el sia kaŭra humoro. Ili ekvidis lian mastron. Kion ili faros? Li aŭdis tiajn onidirojn prila orkoj, kiaj koagulus la sangon. Estis netolereble. Li saltleviĝis. Li forĵetis la celon kaj ĉiujn siajn decidojn, kaj kun ili dubemon kaj timon. Li jam sciis, kie estas lia loko kaj estis: apud la mastro, kvankam ne estis klare, kion li povus tie fari. Li retrokuris laŭ la ŝtupoj, suben laŭ la pado al Frodo.

“Kiom da ili estas? — li pensis. — Tridek aŭ kvardek el la turego minimume, kaj multe pli elsube, mi konjektas. Kiom el ili mi povos mortigi, antaŭ ol ili trafos min? Ili vidos la flamon de la glavo tuj, kiam mi elingigos ĝin, kaj pli aŭ malpli frue ili trafos min. Mi scivolas, ĉu iu kanto iam mencios tion: Kiel falis Samsaĝo en la Alta Pasejo kaj starigis muron da kadavroj ĉirkaŭ sia mastro. Ne, neniu kanto. Kompreneble ne, ĉar la Ringo estos trovita, kaj kantoj ne plu estos. Mi ne povas malhelpi tion. Mia loko estas ĉe sinjoro Frodo. Tion devos kompreni Elrondo kaj la Konsilio, kaj la gravaj princoj kaj princinoj en tuta saĝeco. Iliaj planoj fuŝiĝis. Mi ne povas esti ilia Ringoportanto. Ne sen sinjoro Frodo”.

Sed la orkoj jam pasis el lia nebula vidkampo. Li ne disponis tempon pli frue por konsideri sin mem, sed nun li konstatis, ke li estas lacega, lacega preskaŭ ĝis elĉerpiĝo: liaj kruroj ne povis porti lin tiel, kiel li deziris. Li tro malrapidis. La pado ŝajnis mejlojn longa. Kien ili ĉiuj iris en la nebulo?

Jen ili estis denove! Ankoraŭ sufiĉe antaŭe. Grupo da figuroj ĉirkaŭ io kuŝanta sur la tero; kelkaj ŝajnis kuri tien kaj reen, klinitaj kiel hundoj spurantaj. Li provis plirapidi.

— Ek, Sam! Aŭ vi denove tro malfruos. — Li malstriktigis la glavon en ĝia ingo. Post momento li elingigos ĝin, kaj tiam...

Aŭdiĝis sovaĝa bruego, hupado kaj ridado, kiam io estis levita de la tero.

— Ja hoj! Ja hari hoj! Supren! Supren! Poste kriis voĉo:

— Jam ek! Laŭ la vojo rapida. Reen al la Subpordejo! Laŭ ĉiuj indikoj ŝi ne ĝenos nin ĉi-nokte. — La tuta orka bando komencis moviĝi. Kvar en la mezo portis la korpon alte sur la ŝultroj. — Ja hoj!

Ili ja forprenis la korpon de Frodo. Ili ekiris. Li ne povis ĝisatingi ilin. Tamen li penis plu. La orkoj alvenis la tunelon kaj eniris. La ŝarĝportantoj iris la unuaj, kaj post ili okazis sufiĉe multe da luktado kaj interŝovado. Sam pluiris. Li elingigis la glavon, flagron da bluo en lia mano ŝanceliĝa, sed ili ne vidis ĝin. Ĝuste kiam li alspiregis ĝis ili, la lastaj el ili malaperis en la nigran truon.

Momente li staris, anhelante, premante sian bruston. Poste li viŝis la vizaĝon per sia mano, forigante polvon, ŝviton kaj larmojn.

— Fi al la putraĵo! — li diris kaj saltis post ili en la senlumon.

Ne plu ŝajnis al li tre mallume en la tunelo, prefere tio estis kvazaŭ li elpaŝus el maldensa nebuleto en nebulon pli pezan. Lia laceco kreskis, sed lia volforto tiom pli firmiĝis. Li pensis vidi la lumon de torĉoj iomete antaŭe, sed malgraŭ la klopodado li ne sukcesis ĝisatingi ilin. Orkoj iras rapide en tuneloj, kaj tiun tunelon ili bone konis; ĉar malgraŭ Ŝeloba ili estis devigataj ofte utiligi ĝin kiel la plej rapidan vojon el la Morta Urbo trans la montoj. Dum kiu praa epoko la ĉefa tunelo kaj la ronda ŝaktego estis konstruitaj, kie Ŝeloba ekloĝiĝis en la pratempo, ili ne sciis; sed multajn flankvojojn ili mem fosis ĉirkaŭ ĝi ambaŭflanke, por eviti la fikuŝejon dum sia irado tien-reen pro la aferoj de siaj mastroj. Tiunokte ili ne intencis iri profunden, sed rapidis trovi flankan koridoron, kiu rekondukis al ilia gardoturo sur la klifo. La plimultaj el ili estis jubilaj, ĝojigitaj per tio, kion ili trovis kaj vidis, kaj kurante ili balbutis kaj klaĉadis laŭ siaspeca moro. Sam aŭdis la bruon de iliaj raŭkaj voĉoj, plataj kaj malmolaj en la morta aero, kaj li povis distingi du voĉojn el inter ĉiuj aliaj: tiuj estis pli laŭtaj, kaj pli proksimaj al li. La komandantoj de la du partioj ŝajnis iri ĉe la posto, debatante dumire.

— Ĉu vi povas ĉesigi la bruon de via kanajlaro, Ŝagrato? — gruntis unu. — Ni ne deziras, ke Ŝeloba venu al ni.

— Blage, Gorbago! La viaj kreas pli ol duonon de la bruo, — diris la alia. — Sed lasu ludi la knabojn! Ne necesos ĝeniĝi pri Ŝeloba dum iom da tempo, mi opinias. Ŝi sidiĝis sur najlon, ŝajne, kaj pri tio ni ne ploros. Ĉu vi ne vidis malpuraĉaĵon la tutan vojon al tiu malbeninda ŝia fendeto? Se ni unufoje ŝtopis ĝin, ni ŝtopis ĝin centfoje. Do lasu ilin ridi. Kaj ni trafis iom da bonŝanco finfine: akiris ion, kion Lugburzo deziras.

— Lugburzo deziras ĝin, ĉu? Kio ĝi estas, laŭ via takso? Elfa ĝi ŝajnis al mi, sed malpli granda. Kia danĝero en tia afero?

— Ne scias, ĝis ni ekrigardos.

— Oho! Do ili ne sciigis al vi, kion atendi? Ili ne sciigis al ni ĉion, kion scias ili, ĉu ne? Eĉ ne duonon. Sed ili povas kulpi erarojn, tion povas eĉ la Superuloj.

— Ĉit, Gorbago! — La voĉo de Ŝagrato mallaŭtiĝis, tiel ke eĉ la akrigita aŭdo de Sam nur streĉe sukcesis aŭdi ilian parolon. — Povas okazi, sed ĉie ili havas okulojn kaj orelojn; tre probable ankaŭ en mia trupo. Sed tute nedubeble, ili ĝeniĝas pri io. Tiaj estas la nazguloj sube, laŭ via priskribo; kaj ankaŭ Lugburzo estas. Io preskaŭ forglitis.

— Preskaŭ, laŭ vi! — diris Gorbago.

— Bone, — diris Ŝagrato, — sed pri tio ni parolos poste. Atendu ĝis ni alvenos la Subvojon. Tie estas loko, kie ni povos iom interparoli, dum la knaboj pluiros.

Baldaŭ poste Sam vidis malaperon de la torĉoj. Baldaŭ aŭdiĝis muĝa bruo, kaj ĝuste kiam li alrapidis, frapsono. Laŭ lia supozo, la orkoj turniĝis kaj eniris ĝuste tiun aperturon, kiun Frodo kaj li esploris kaj trovis blokita. Ĝi ankoraŭ estis blokita.

Ŝtonego ŝajnis bari la vojon, sed iel la orkoj trairis, ĉar li aŭdis iliajn voĉojn aliflanke. Ili daŭre kuris pluen, pli kaj pli profunden en la monton, reen al la turego. Sam sentis malesperon. Ili ficele forportis la korpon de lia mastro, sed li ne povis sekvi. Li puŝis kaj ŝovis la baraĵon, kaj li ĵetis sin kontraŭ ĝin, sed ĝi rifuzis cedi. Tiam ne malproksime, aliflanke, aŭ tiel ŝajnis al li, li aŭdis denove la voĉojn de la du komandantoj. Li staris aŭskultante dum iom da tempo, eble esperante ekscii ion utilan. Eble Gorbago, kiu ŝajne apartenis al Minaso Morgul, elvenos, kaj tiam li povus engliti.

— Ne, mi ne scias, — diris la voĉo de Gorbago. — La mesaĝoj trairas pli rapide ol io povas flugi, ĝenerale. Sed mi ne esploras, kiel tio efektiviĝas. Malpli danĝere tiel. Grr! Tiuj nazguloj tremigas min. Kaj ili senkorpigas vin tuj ekvidinte vin, kaj lasas vin malvarma en la senlumo aliflanke. Sed Li ŝatas ilin; ili estas Liaj favoratoj nuntempe, do senutilas grumbli. Mi diras al vi, ke ne estas ludo servi tie sube en la urbo.

— Vi vere spertiĝus, ĉi tie supre en Ŝeloba societo, — diris Ŝagrato.

— Mi preferus esti nek ĉi tie, nek tie. Sed la milito jam komenciĝis, kaj kiam ĝi finiĝos, la aferoj eble faciliĝos.

— Ĝi bone progresas, laŭ ili.

— Ili sendube diras tion, — gruntis Gorbago. — Ni vidos. Sed ĉiuokaze, se ĝi ja progresas bone, supozeble estos pli da spaco. Kiel vi supozas: se ni havos okazon, eble vi kaj mi forŝteliĝu kaj starigu propran entreprenon kun kelkaj fidindaj knaboj, ie kie iom da bona rabaĵo estas ĉemane, kaj mankos trudaj ĉefoj.

— Ha! — diris Ŝagrato. — Kiel en la malnova tempo.

— Jes, — diris Gorbago. — Sed ne dependu de tio. Mi ne trankvilas mense. Kiel vi diris, la trudaj ĉefoj, jes, — lia voĉo preskaŭ flustriĝis, — jes, eĉ la plej ĉefa, povas erari. Io preskaŭ forglitis, laŭ vi. Laŭ mi, io *jam* forglitis. Kaj ni devos atenti. Ĉiam la kompatindaj urukoj devas korekti glitojn, kontraŭ malmulta danko. Sed ne forgesu: la malamikoj ne amas nin, kiel ili ne amas Lin, kaj se ili submetos Lin, ankaŭ ni estos kaputaj. Sed diru: je kioma horo oni ordonis vian eliron?

— Antaŭ ĉirkaŭ unu horo, ĝuste antaŭ ol vi vidis nin. Mesaĝo venis:

Nazguloj maltrankvilas. Timas pri spionoj sur la Ŝtupoj. Duoblan priatenton. Patrolon al supro de la ŝtupoj. Mi venis tuj.

— Afero malbona, — diris Gorbago. — Vidu: niaj Silentaj Vaĉantoj estis maltrankvilaj antaŭ pli ol du tagoj, tion mi scias. Sed mia patrolo ne estis ordonita eliri ĝis post unu plia tago, kiel ankaŭ mesaĝon oni ne sendis al Lugburzo pro tio, ke la Grandan Signalon oni hisis, kaj la ĉefa nazgulo foriris al la milito, kaj ĉio cetera. Kaj poste oni ne povis sufiĉe longe allogi la atenton de Lugburzo, oni diras.

— La Okulo okupiĝis aliloke, mi supozas, — diris Ŝagrato. — Laŭdire okazas gravaj aferoj forokcidente.

— Povas esti, — graŭlis Gorbago. — Sed dume malamikoj supreniris la Ŝtupojn. Kaj pri kio vi okupiĝas? Via tasko estas sentineli, ĉu ne, kun aŭ sen specialaj ordonoj. Por kio vi utilas?

— Sufiĉe! Ne provu instrui al mi mian laboron. Ni estis viglaj efektive. Ni sciis, ke okazas aferoj strangaj.

— Tre strangaj!

— Jes, tre strangaj: lumoj kaj kriado kaj tiel plu. Sed Ŝeloba aktivis. Miaj knaboj vidis ŝin kaj ŝian Ŝteliranton.

— Ĉu ŝian Ŝteliranton? Kio estas tio?

— Vi certe vidis lin: etan maldikan nigrulon, similan al araneo aŭ eble pli al malsata rano. Li estis ĉi tie pli frue. Venis *el* Lugburzo la unuan fojon, kaj de Supre estis la ordono, ke ni permesu al li trapasi. Li ascendis la Ŝtupojn unu-dufoje post tiam, kaj ni lasis lin trankvila: li ŝajnas havi ian interkonsenton kun ŝia Moŝto. Mi supozas, ke li ne estas manĝinda: ŝi ne ĝenus sin pri ordonoj de Supre. Sed bele vi gardas en la valo: li estis ĉi tie je unu tago antaŭ ĉi tuta tohuvabohuo. Frue hieraŭ nokte ni vidis lin. Ĉiuokaze niaj knaboj raportis, ke Ŝia Moŝto amuzas sin, kaj tio ŝajnis al mi en ordo, ĝis venis la mesaĝo. Mi supozis, ke ŝia ŝteliranto alportis al ŝi ludilon, aŭ ke vi sendis al ŝi donacon, militkaptiton aŭ ion. Mi ne enmiksiĝas, kiam ŝi ludas. Nenio preterpasas Ŝeloban, kiam ŝi estas ĉasanta.

— Nenio, ĉu vi diras! Ĉu vi ne uzis viajn okulojn tie malantaŭe? Mi diras al vi, ke mi ne trankvilas mense. Kio ajn ascendis la Ŝtupojn, tio ja preterpasis. Ĝi tranĉis ŝian teksaĵon kaj komplete eskapis el la truo. Tio pripensindas!

— Nu, bone, ŝi kaptis lin en la fino, ĉu ne?

— *Kaptis* lin? Kaptis *kiun*? ĉu tiun ĉi etulon? Sed se li estus la sola, ŝi antaŭlonge trenus lin al sia konservejo, kaj li nun estus tie. Kaj se Lugburzo volus havi lin, ĝuste vi devus iri por akiri lin. Bele por vi. Sed ĉeestis pli ol unu.

Tiupunkte Sam kornencis aŭskulti pli atente kaj premis sian orelon al la

ŝtono.

— Kiu tranĉis la ŝnurojn, per kiuj ŝi volvis lin, Ŝagrato? La sama, kiu tranĉis la teksaĵon. Ĉu vi ne vidis tion? Kaj kiu enpikis pinglon en ŝian Moŝton? La sama, supozeble. Kaj kie estas tiu? Kie li estas, Ŝagrato?

Ŝagrato nenion respondis.

— Konvenas, ke vi pripensu tion, se vi kapablas. Ne estas ridinda afero. Neniu, *neniu* ĝis nun enpikis pinglon en Ŝeloban, kiel vi devus scii mem bone. Tio ne plorindas, sed pripensu: iu ĉirkaŭvagas ĉi tie, kiu pli danĝeras ol iu ajn alia ribelulo iam promeninta ekde la malnovaj misepokoj, depost la granda Sieĝo. Io efektive forglitis.

— Kaj kio do estas tio? — graŭlis Ŝagrato.

— Laŭ ĉiuj signoj, estro Ŝagrato, mi opinias, ke disvagas granda batalisto, plej verŝajne elfo, ĉiuokaze kun elfa glavo, kaj eble ankaŭ hakilo; kaj li vagas interne de viaj limoj, cetere, kaj vi neniam ekvidis lin. Vere tre strange! — Gorbago kraĉis. Sam amare ridetis pro tiu priskribo pri li.

— Ah, bone, ĉiam vi kutimas akcepti vidpunkton pesimisman, — diris Ŝagrato. — Vi rajtas interpreti la signojn laŭ via bontrovo, sed eble oni povas klarigi ilin alimaniere. Ĉiuokaze mi postenigis ĉie sentinelojn, kaj mi intencas pritrakti la aferojn unuope. Post kiam mi rigardos la ulon, kiun ni fakte kaptis, mi komencos zorgi pri io alia.

— Laŭ mia konjekto vi ne trovos multon en tiu etulo, — diris Gorbago. — Li eble ne koncerniĝis pri la reala misaĵo. La grandulo kun akra glavo ne ŝajnis alte taksi lin ĉiuokaze; li nur lasis tiun kuŝanta: tipe elfa agmaniero.

— Ni vidos. Venu jam. Ni sufiĉe interparolis. Ni iru rigardi la kaptiton.

— Kion vi intencas fari pri li? Ne forgesu, ke mi la unua ekvidis lin. Se okazos ludo, mi kaj miaj knaboj devos partopreni.

— Regu vin, — graŭlis Ŝagrato, — al mi estas ordonite. Kaj koncernos mian ventron, kaj vian, se mi malobeos. Ĉiu senrajta enirinto, trovita de la gardistaro, estu enkarcerigita en la turego. La kaptito estas nudigenda. Plena priskribo de ĉiu artiklo, vestaĵo, armilo, letero, ringo, aŭ bagatelaĵo estas sendenda tuj al Lugburzo kaj *nur* al Lugburzo. Kaj la kaptiton oni devas teni sekura kaj nedifektita, kontraŭ mortpuno al ĉiu ano de la gardistaro, ĝis Li iun sendos aŭ venos Mem. Tio estas sufiĉe klara, kaj tion mi intencas fari.

— Ĉu nudigenda? — diris Gorbago. — Ĉu tio inkluzivas dentojn, ungojn, harojn kaj tiel plu?

— Ne, nenion tian. Lin prenos Lugburzo, mi ja diris al vi. Oni volas havi lin sekuran kaj kompletan.

— Vi trovos tion malfacila, — ridis Gorbago. — Jam nun li estas nura kadavraĵo. Kion faros Lugburzo pri tia aĵo, mi ne konjektas. Li samutile enirus kuirpoton.

— Idioto, — graŭlis Ŝagrato. — Vi parolis tre sprite, sed multon vi ne scias, kvankam la plimultaj aliaj tion scias. Vin ricevos la kuirpoto aŭ Ŝeloba, se vi ne gardos vin. Kadavraĵo! Ĉu nur tiom vi konas Ŝian Moŝton? Kiam ŝi ligas per ŝnuroj, ŝi celas viandon. Mortan viandon ŝi ne manĝas, nek suĉas malvarman sangon. Tiu ulo ne estas mortinta!

Sam ŝanceliĝis, kroĉante la ŝtonon. Li sentis, kvazaŭ renversiĝus la tuta malhela mondo. Tiom forta estis la ŝoko, ke li preskaŭ svenis, sed eĉ luktante por reteni sian konscion, profunde interne de si, li konstatis la komenton: “Idioto, li ne estas mortinta, kaj en via koro vi sciis tion. Ne fidu vian kapon, Samsaĝo, ĝi ne estas via plej efika parto. Via problemo estas, ke vi neniam efektive sentis esperon. Nun kion fari?” Momente nenion, krom apogi sin al la senmova ŝtono kaj aŭskulti, aŭskulti la fiajn orkajn voĉojn.

— Ta! — diris Ŝagrato. — Ŝi posedas pli ol unu venenon. Kiam ŝi ĉasas, ŝi nur pikas ilin ĉe la nuko, kaj ili malrigidiĝas kvazaŭ senostigitaj fiŝoj, kaj poste ŝi traktas ilin laŭplaĉe. Ĉu vi memoras la maljunan Ufthakon? Dum tagoj li forestis. Poste ni trovis lin en angulo; li estis pendanta, sed li estis plenkonscia kaj furiozrigarda. Kiom ni ridis! Ŝi forgesis lin, eble, sed ni ne tuŝis lin, ĉar ne valoris entrudiĝi al Ŝi. Ne, tiu eta putraĵo vekiĝos post kelkaj horoj, kaj krom provizora naŭza sento li estos tute en ordo. Aŭ estus tia, se Lugburzo lasus lin trankvila. Kaj kompreneble li scivolos pri sia troviĝejo kaj pri tio, kio okazis al li.

— Kaj pri tio, kio al li okazos, — ridis Gorbago, — ni povos ĉiuokaze rakonti al li iom, se nenion alian ni rajtos. Supozeble li neniam antaŭe estis en bela Lugburzo, do eble li ŝatos scii, kion atendi. Tio estos pli amuza ol mi supozis. Ni iru!

— Mankos amuziĝo, mi diris al vi, — diris Ŝagrato. — Kaj nepras teni lin sendifekta, aŭ ni frontos la morton.

— Bone! Sed sur via loko mi kaptus la grandulon, kiu ĉirkaŭiras, antaŭ ol sendi raporton al Lugburzo. Ne aŭdiĝos tre bele, se vi diros, ke la katidon vi kaptis, sed lasis eskapi la katon.

La voĉoj komencis formoviĝi. Sam aŭdis la bruon de piedoj forirantaj. La ŝoko forlasis lin, kaj nun sovaĝa furiozo inundis lin.

— Mi komplete eraris! — li kriis. — Mi tion antaŭvidis. Nun ili havas lin, la demonoj! la putraĵoj! Neniam forlasu vian mastron, neniam, neniam: tio estis mia ĝusta regulo. Kaj en mia koro mi sciis tion. Ke mi estu pardonita! Nun mi devos reatingi lin. Iel, iel!

Li ree elingigis sian glavon kaj batis la ŝtonon per la tenilo, sed ĝi nur redonis obtuzan sonon. La glavo tamen jam brilis tiel hele, ke li povis malklare vidi pro ĝia lumo. Surprizite li rimarkis, ke la blokego estas peze pordforma, kaj altas malpli ol duoble kiom li. Super ĝi estis malhela

malplena spaco inter la supra ekstremo kaj la malalta arkaĵo de la aperturo. Ĝi estis probable intencita nur kiel barilo kontraŭ eniro de Ŝeloba, ligita interne per ia klinko aŭ riglilo ekster atingo de ŝia ruzemo. Per sia restanta forto Sam saltis, supergrimpis, kaj lasis sin fali; poste li kuradis freneze kun la glavo flamanta en sia mano, ĉirkaŭ angulon kaj supren tra serpentuma tunelo.

La sciiĝo, ke lia mastro ankoraŭ vivas, stimulis lin al lasta klopodo preter pensoj pri laceco. Li vidis nenion antaŭe, ĉar tiu ĉi nova koridoro tordiĝis kaj turniĝis konstante; sed li opiniis, ke li proksimiĝas al la du orkoj: ties voĉoj denove malforiĝis. Nun ili ŝajnis sufiĉe proksimaj.

— Tion mi intencas fari, — diris Ŝagrato kolere. — Meti lin tute alte en la plej supra ĉambro.

— Por kio? — graŭlis Gorbago. — Ĉu vi ne havas karcerojn sube?

— Li estu neatingebla, mi diras al vi, — respondis Ŝagrato. — Komprenite, ĉu? Li estas valora. Mi ne senescepte fidas miajn knabojn, kaj el la viaj mi fidas neniun; ankaŭ ne vin, kiam vi avidegas amuzaĵon. Li estos tie, kie mi deziras lin, kaj kien vi ne venos, se vi ne restos ĝentila. Al la supro, mi diras. Tie li estos sekura.

— Ĉu vere? — diris Sam. — Vi forgesas pri la granda elfa batalisto, kiu ĉirkaŭvagas! — Dirinte tion, li kuregis ĉirkaŭ la lastan angulon, nur por konstati, ke pro iu trompo de la tunelo aŭ de la aŭdkapablo havigita de la Ringo li mistaksis la distancon.

La du orkaj figuroj estis ankoraŭ iom antaŭe. Li jam povis vidi ilin, nigrajn kaj stumpajn fone de ruĝa brilego. La koridoro iris rekte finfine, supren laŭ deklivo; kaj ĉe la ekstremo, larĝe malfermita, estis granda pordoparo, kondukanta supozeble al profundaj ĉambroj fore sub la alta korno de la turego. La orkoj kun sia ŝarĝo jam eniris. Gorbago kaj Ŝagrato proksimiĝis al la pordego.

Sam aŭdis eksplodon de raŭka kantado, blekantaj kornoj kaj gongobatado, hida bruego. Gorbago kaj Ŝagrato estis jam sur la sojlo.

Sam kriegis kaj svingis Pikilon, sed lian etan voĉon dronigis la tumulto. Neniu atentis lin.

La granda pordego krake fermiĝis. Bum. La feraj fermstangoj falis en sian pozicion interne. Klak. La pordego estis fermita. Sam ĵetis sin kontraŭ la riglitajn latunajn bendojn kaj falis senkonscia al la tero. Li troviĝis ekstere en la mallumo. Frodo vivis, sed estis kaptita de la malamikoj.

LA KVINA LIBRO



1. Isengardo, 2. Ŭestfaldo, 3. Profundaĵo de Helmo, 4. Tol Brandiro, 5. Kairo Andros, 6. Norda Itilio, 7. Uduno, 8. Minaso Morgul, 9. Minaso Tirit, 10. Losarnaĥo, 11. Ereĥo, 12. Lamedono, 13. Tolfalaso

1

Minaso Tirit

Grinĉjo elrigardis de la ŝirmo de l' mantelo de Gandalfo. Li scivolis, ĉu li vekiĝis aŭ plu dormas, daŭre en la rapidmova sonĝo, en kiu li estis tiom longe volvita ekde kiam komenciĝis la granda rajdado. La malhela mondo preterrapidegis, kaj vento laŭte kantis en liaj oreloj. Li povis vidi nenion escepte de la girantaj steloj, kaj fore dekstre vastajn ombrojn kontraŭ la ĉielo, kie la montoj de la sudo marŝis preterpaŝe. Dormeme li klopodis kalkuli la tempojn kaj etapojn de la vojaĝo, sed lia memoro duondormis kaj malcertis.

Okazis la unua rajdado terure rapida kaj senhalta, kaj poste en la aŭroro li vidis palan ekbrilon oran, kaj ili alvenis silentan urbon kaj la grandan senhoman domon sur monteto. Kaj apenaŭ ili atingis ties ŝirmon, jen la flugilhava ombro denove preterpasis supre, kaj homoj velkis pro timo. Sed Gandalfo alparolis lin per mallaŭtaj vortoj, kaj li dormis en angulo, lace sed maltrankvile, malklare konscia pri venoj kaj iroj kaj pri homoj parolantaj kaj Gandalfo ordonanta. Kaj poste rajdado, rajdado en la nokto. Jen estis la dua, ne, la tria nokto post kiam li enrigardis la Ŝtonon. Kaj pro tiu hida memoraĵo li plene vekiĝis kaj ektremis, kaj la bruo de la vento pleniĝis de voĉoj minacaj.

Lumo ĉendiĝis sur la ĉielo, ekflagro de flava fajro post malhelaj bariloj. Grinĉjo retrokaŭris, momente timoplena, scivolante en kiun timigan landon Gandalfo portas lin. Li frotis siajn okulojn kaj ekvidis, ke tio estas la luno leviĝanta super la orientaj ombroj, preskaŭ jam tute plena. Do la nokto ankoraŭ ne maljunis, kaj dum horoj daŭros la malhela vojaĝo. Li ekmoviĝis kaj parolis.

— Kie ni estas, Gandalfo?

— En la regno Gondoro, — la sorĉisto respondis. — La provinco Anorieno ankoraŭ preterpasas.

Regis denove silento dum kelka tempo. Post subite Grinĉjo ekkriis:

— Kio estas tio? Vidu! Fajro, ruĝa fajro! Ĉu en tiu ĉi lando estas drakoj? Vidu, jen alia!

Responde Gandalfo laŭte kriis al sia ĉevalo:

— Ek, Ombrofakso! Necesas rapidi. Mallonga estas la tempo. Vidu! La signalfajroj de Gondoro flamas vokante helpon. Milito ekbrulas. Vidu, jen la fajro sur Amono Din, kaj flamo sur Ejlenaĥo; kaj jen ili rapidas

okcidenten: Nardolo, Erelaso, Min-Rimono, Kalenhado, kaj Halifirieno rande de Rohano.

Sed Ombrofakso paŭzis dumpaŝe, malrapidante al promeno, kaj poste ĝi levis sian kapon kaj henis. Kaj el la mallumo venis responda henado; kaj baldaŭ aŭdiĝis tondrado de hufoj, kaj tri rajdantoj albalaiĝis kaj pasis kiel flugantaj fantomoj antaŭ la luno kaj malaperis okcidenten. Tiam Ombrofakso kuntiriĝe pretigis sin kaj forsaltis, kaj la nokto trafluis ĝin kvazaŭ muĝa vento.

Grinĉjo denove dormemiĝis kaj malmulte atentis Gandalfon, dum tiu rakontis al li pri la moroj de Gondoro, kaj kiel la Reganto de la urbo konstruigis signalfajrojn sur la pintoj de marĝenaj montetoj laŭlonge de ambaŭ flankoj de la granda montaro kaj konservis postenojn tiuloke, kie freŝaj ĉevaloj ĉiam pretis por porti liajn mesaĝistojn al Rohano en la nordo, aŭ al Belfalaso en la sudo.

— Jam delonge ne flamis la signalfajroj de la nordo, — li diris, — kaj dum la antikvaj tagoj de Gondoro ili ne estis bezonataj, ĉar oni havis la Sep Ŝtonojn.

Grinĉjo ekmoviĝis maltrankvile.

— Dormu denove kaj ne timu! — diris Gandalfo. — Ĉar vi iras ne kiel Frodo al Mordoro, sed al Minaso Tirit, kaj tie vi estos tiel sekura, kiel oni povas esti nuntempe. Se Gondoro falos, aŭ la Ringo estos kaptita, poste la Provinco estos nenia rifuĝejo.

— Vi ne komfortigas min, — diris Grinĉjo, tamen dormo tragrimpis lin. La lasta afero, kiun li memoris antaŭ ol li profunde ekdormis, estis ekvido de altaj blankaj montopintoj, glimantaj kvazaŭ ŝvebantaj insuloj super la nuboj, dum ilin trafis la lumo de la okcidentira luno. Li scivolis, kie estas Frodo, ĉu li estas jam en Mordoro, aŭ ĉu li mortis; kaj li ne sciis, ke Frodo de tre malproksime rigardas tiun saman lunon, dum ĝi subeniras malantaŭ Gondoro antaŭ alveno de la tago.

Grinĉjo vekiĝis aŭdante voĉojn. Alia tago de sinkaŝo kaj nokto de vojaĝado jam forrapidis. Estis krepuske: malvarma tagiĝo estis denove baldaŭa, kaj ĉirkaŭis ilin frostigaj grizaj nebuletoj. Ombrofakso staris ŝvite vaporante, sed ĝi tenis la kolon fiere kaj evidentigis neniun signon de laciĝo. Multaj altaj homoj peze mantelitaj staris apud ĝi, kaj malantaŭ ili baŭmis en la nebuleto ŝtona muro. Parte ruina ĝi ŝajnis, sed jam antaŭ forpaso de la nokto aŭdiĝis la bruo de hasta laborado: martelbatado, trultintado kaj grincado de radoj. Torĉoj kaj flagriloj malarde flametis ie-tie en la nebuleto. Gandalfo alparolis la homojn, kiuj baris lian vojon, kaj aŭskultante Grinĉjo konstatis, ke li mem estas diskutata.

— Jes, vere, ni konas vin, Mitrandiro, — diris la estro de l’ homoj,

— kaj vi posedas la pasvortojn de la Sep Pordoj kaj rajtas libere antaŭeniri. Sed vian kunulon ni ne konas. Kio li estas? ĉu gnomo el la montaro de l' nordo? Ni deziras neniujn fremdulojn en la lando nuntempe, krom se ili estas potencaj armilportantoj, pri kies fidindeco kaj helpo ni povas certi.

— Mi garantios lin antaŭ la trono de Denetoro, — diris Gandalfo.

— Kaj se temas pri kuraĝo, tion oni ne povas taksi laŭ la staturo. Li trapasis pli da bataloj kaj danĝeroj ol vi trapasis, Ingoldo, kvankam vi staturas duoble pli alte ol li; kaj li venas nun de la breĉado de Isengardo, pri kiu ni alportas informojn, kaj li treege lacas, aŭ mi vekus lin. Li nomiĝas Peregrino, soldato tre kuraĝa.

— Ĉu soldato? — diris Ingoldo dubeme, kaj la ceteraj ridis.

— Soldato! — kriis Grinĉjo, jam komplete vigligita. — Ĉu soldato! Tute ne! Mi estas hobito kaj ne pli kuraĝa ol mi estas soldata, krom eble de tempo al tempo pro neceso. Ne permesu, ke Gandalfo vin trompu!

— Multaj plenumintoj de kuraĝaj agoj eble neniom pli dirus, — diris Ingoldo. — Sed kio estas hobito?

— Duonulo, — respondis Gandalfo. — Ne, ne tiu pri kiu oni rakontis, — li aldonis, vidante miron sur la vizaĝoj de l' homoj. — Ne tiu, sed parenco lia.

— Jes, kaj iu, kiu vojaĝis kun li, — diris Grinĉjo. — Kaj Boromiro el via urbo estis kun ni, kaj li savis min en la neĝoj de la nordo, kaj en la fino li estis mortigita min defendante kontraŭ multaj malamikoj.

— Lasu tion! — diris Gandalfo. — Informon pri tiu doloraĵo oni devus unuavice sciigi al lia patro.

— Tio estas jam divenita, — diris Ingoldo, — ĉar okazis ĉi tie lastatempe strangaj antaŭsignoj. Sed trapasu nun rapide! Ĉar la Reganto de Minaso Tirit avidas renkonti iun ajn, kiu alportas la plej lastajn informojn pri lia filo, ĉu tiu estas homo aŭ...

— Hobito, — diris Grinĉjo. — Malmulte da servado mi povos proponi al via estro, sed kion mi kapablas, tion mi plenumos, memorante la bravan Boromiron.

— Fartu bone! — diris Ingoldo, kaj la homoj liberigis la vojon al Ombrofakso, kaj tiu trapasis mallarĝan pordon en la muro. — Ke vi portu al Denetoro bonajn konsilojn dum lia bezono kaj al ni ĉiuj, Mitrandiro! — Ingoldo kriis. — Sed vi venas kun sciigoj pri malĝojo kaj danĝero, laŭ, oni diras, via kutimo.

— Pro tio ke mi venas malofte, nur kiam mia helpo estas bezonata, — respondis Gandalfo. — Kaj koncerne konsilojn, al vi mi volas diri, ke tro malfrue vi riparas la muron de Pelenoro. Kuraĝo estos jam via plej bona defendo kontraŭ la ŝtormo proksimiĝanta — tio kaj tiom da espero, kiom mi

alportas. Ĉar ne ĉiuj informoj, kiujn mi alportas, estas misaj. Sed lasu viajn trulojn kaj akrigu viajn glavojn!

— La laboro estos finita antaŭ la vespero, — diris Ingoldo. — Tiu ĉi estas la lasta murparto pretigota por defendo: la malplej aperta por atako, ĉar ĝi frontas niajn amikojn el Rohano. Ĉu vi scias ion pri ili? Ĉu ili sekvos la alvokon, laŭ via opinio?

— Jes, ili venos. Sed ili spertis multajn batalojn malantaŭ viaj dorsoj. Nek tiu ĉi vojo, nek iu ajn vojo frontas sekurecon. Estu atentaj! Se ne ekzistus Gandalfo Ŝtormkorvo, vi estus vidintaj amason da malamikoj venantaj el Anorieno kaj neniujn rajdistojn de Rohano. Kaj tio eĉ nun povos okazi. Fartu bone, kaj ne doram!

Gandalfo nun trapasis en la larĝan terenon post Ramaso Ekor. Tiel la gondoranoj nomis la limmuron, kiun ili penege konstruis, post kiam Itilio submetiĝis al la ombro de la Malamiko. Tra dek leŭgoj aŭ pli ĝi etendiĝis de la montara subo kaj tiom reen, enfermante per sia barilo la kampojn de Pelenoro: belaj kaj fekundaj urborandoj sur la longaj deklivoj kaj terasoj descendantaj al la profundaj niveloj de Anduino. Ĉe sia plej fora punkto de la Granda Pordego de l' urbo, nord-oriente, la muro malproksimis kvar leŭgojn, kaj tie de brovumanta bordo ĝi superrigardis la longajn ebenaĵojn apud la rivero, kaj oni konstruis ĝin alta kaj fortika; ĉar tiuloke, sur murhava digvojo, la vojo alvenis de la travadejoj kaj pontoj de Osgiliado kaj trapasis gardatan pordon inter krenelitaj turoj. Plej proksime la muro troviĝis malmulte pli ol unu leŭgon de la urbo, kaj tio estis sud-oriente. Tie Anduino, fluante laŭ larĝa kurbo ĉirkaŭ la montetoj de Emin Arneno en Suda Itilio direktiĝis abrupte okcidenten, kaj leviĝis la limmuro sur ĝia vera rando; kaj sube kuŝis la kajoj kaj albordiĝejoj de Harlondo por boatoj, kiuj venis laŭ la rivero de la sudaj provincoj.

La regiono estis riĉa, kun larĝaj kultivaĵoj kaj multaj fruktarbaroj, kaj troviĝis parceloj kun sekigejoj kaj grenejoj, ŝafejoj kaj staloj, kaj multaj rojoj tra la verdo ondetantaj de l' altejoj ĝis Anduino. Tamen la paŝtistoj kaj terkulturistoj tie loĝantaj estis malmultaj, kaj la pliparto de la gondoranoj loĝis en la sep cirkloj de la urbo, aŭ en la altaj valoj de la montaraj limoj en Losarnaĥo, aŭ pli sude en bela Lebenino kun ties kvin rapidaj riveretoj. Tie loĝis hardita popolo inter la montoj kaj la maro. Oni taksis ilin homoj el Gondoro, tamen ilia sango estis miksita, kaj inter ili estis malaltaj brunhaŭtuloj, kies prapatroj devenis de la forgesitoj, kiuj loĝis en ombro de la montoj dum la Malhelaj Jaroj antaŭ la alveno de la reĝoj. Sed poste, en la granda feŭdo Belfalaso, loĝis princo Imrahilo en sia kastelo Dol Amroto apud la maro, kaj li estis altrasa, kaj ankaŭ lia popolo: altkreskaj fieraj homoj kun okuloj margrizaj.

Nun kiam rajdis Gandalfo kelkan tempon, taglumo plifortiĝis sur la ĉielo, kaj Grinĉjo vigligis sin kaj rigardis supren. Maldekstre kuŝis nebuletomaro, leviĝanta ĝis morna ombro en la oriento; sed dekstre grandaj montaroj suprenstreĉis siajn vertojn, etendiĝante de la okcidento al kruta kaj subita ekstremo, kvazaŭ dum kreado de la lando la rivero trarompus grandan barilon, eltrancante potencan valon por esti tereno de batalado kaj debatoj en venontaj tempoj. Kaj tie, kie la Blankaj Montoj de Eredo Nimrajs alvenis sian finon, li vidis, kiel promesis Gandalfo, la malhelan amason de monto Mindoluino, la profunde purpurajn ombrojn de ties altaj valetoj, kaj ĝian altan facon blankiĝanta en la naskiĝanta tago. Kaj sur ties elpuŝita genuo estis la Gardata Urbo, kun ĝiaj sep ŝtonaj muroj tiel fortaj kaj malnovaj, ke ĝi ŝajnis ne konstruita, sed elfosita de gigantoj el la ostoj de la tero.

Ĝuste kiam Grinĉjo mire rigardis ilin, la muroj ŝanĝiĝis de baŭma grizo al blanko, malforte ruĝiĝante en la aŭroro; kaj subite la suno grimpis super la orientan ombron kaj elpuŝis radion, kiu frapis la facon de la urbo. Tiam Grinĉjo laŭte ekkriis, ĉar la Turego de Ektelipno, staranta alta interne de la plej supra muro, elradiis antaŭ la ĉielo, ekbrilante kiel pikilo perla kaj arĝenta, alta kaj svelta kaj belforma, kaj ties pinto ekbrilis kvazaŭ ĝi estus farita el kristaloj; kaj blankaj standardoj malvolviĝis kaj bloviĝis sur la krenelaro en la matena venteto, kaj alte kaj fore li aŭdis klaran sonoron kvazaŭ de arĝentaj trumpetoj.

Tiel Gandalfo kaj Peregrino rajdis al la Granda Pordego de Gondoro ĉe leviĝo de la suno, kaj la feraj pordoklapoj rulmalfermiĝis antaŭ ili.

— Mitrandiro! Mitrandiro! — homoj kriis. — Jam ni scias, ke la ŝtormo estas proksima!

— Ĝi venos tuj, — diris Gandalfo. — Mi rajdis sur ties flugiloj. Lasu min pasi! Mi devas veni al via Reganto Denetoro, dum daŭras lia regado. Kio ajn okazos, vi alvenis la finon de tiu Gondoro, kiun vi konis. Lasu min pasi!

Tiam la homoj retroiris pro la ordonemo de lia voĉo kaj ne plu pridemandis lin, kvankam ili gapis mirante al la hobito sidanta antaŭ li kaj al la ĉevalo kiu portis lin. Ĉar la urbanoj tre malmulte utiligis ĉevalojn kaj tiujn oni malofte vidis sur la stratoj, krom nur tiujn rajdatajn de la kurieroj de ilia reganto. Kaj ili diris: “Nepre tiu estas unu el la grandaj ĉevaloj de la reĝo de Rohano, ĉu ne? Eble la rohananoj baldaŭ venos por nin plifortigi”. Sed Ombrofakso paŝis fiere laŭ la longa serpentuma vojo.

Ĉar la formo de Minaso Tirit estis tia, ke ĝi estis konstruita je sep niveloj, unuope elfositaj sur la monto, kaj ĉirkaŭ ĉiu el ili estis metita muro, kaj en ĉiu muro estis pordo. Sed la pordoj ne estis metitaj en vico: la Granda

Pordego en la Urba Muro troviĝis ĉe la orienta punkto de la rondiro, sed la plej proksima frontis duone suden, kaj la tria duone norden, kaj tiel tien-reen supren; tiel ke la pavimita vojo, kiu grimpis al la Citadelo turniĝis jen tien jen alien tra la faco de la monteto. Kaj ĉiufoje kiam ĝi pasis la linion de la Granda Pordego ĝi trairis arkan tunelon, penetrante vastan roktrumon kies enorma elpuŝiĝo disduigis ĉiujn cirklojn de la urbo krom la unua. Ĉar parte laŭ la praa formo de la monteto, parte pro la potencaj faklerto kaj laboro en la pratempo, elstariĝis el la malantaŭo de la larĝa korto malantaŭ la Pordego turanta ŝtonbastiono, kies eĝo, akra kiel ŝipa kilo, frontis orienten. Supren ĝi leviĝis ĝis la nivelo de la plej supra cirklo, kaj tie ĝin kronis krenelaro; tiel ke personoj en la Citadelo povis, kiel maristoj sur monteca ŝipo, malsupren rigardi al la Granda Pordego sepcent futojn sube. Ankaŭ la enirejo de la Citadelo frontis orienten, sed estis elfosita en la kerno de la roko; de tie longa lamplumita deklivo etendiĝis supren al la sepa pordo. Tiel oni fine atingis la Altan Korton, kaj la Placon de l' Fontano antaŭ la subaĵo de la Blanka Turego: alta kaj belforma ĝi estis, cent kvindek klaftojn de la bazo ĝis la pinto, kie flosis la standardo de la Regantoj je mil futoj super la ebenaĵo.

Fortika citadelo ĝi ja estis, kaj ne venkebla per amaso da malamikoj, dum enestis iuj kapablaj teni armilojn; krom se iu malamiko povus veni de malantaŭe kaj grimpi la pli malaltajn randojn de Mindoluino, kaj tiel alveni la mallarĝan ŝultron kiu ligis la Monton de Gardado kun la montara pasejo. Sed tiu ŝultro, kiu supreniĝis ĝis alteco de la kvina muro, estis barita per grandaj remparoj eĉ ĝis la krutegaĵo kiu superpendis ĝian okcidentan ekstremon; kaj en tiu spaco staris la domoj kaj kupolaj tomboj de forpasintaj reĝoj kaj regantoj, eterne silentaj inter la monto kaj la turego.

Ĉiam pli mirigite Grinĉjo gapis al la granda ŝtonurbo, pli vasta kaj pli impona ol io ajn pri kio li imagis; pli granda kaj pli fortika ol Isengardo, kaj multe pli bela. Tamen ĝi estis efektive jaron post jaro kadukiĝanta; kaj jam al ĝi mankis duono de la homoj, kiuj povus loĝi tie senĝene. Sur ĉiu strato ili pasis iun grandan domon aŭ korton, super kies pordoj kaj arkitaj trairejoj estis ĉizitaj multaj belaj literoj strange kaj antikve formitaj: nomoj, Grinĉjo konjektis, de eminentuloj kaj parencaroj, kiuj iam loĝis tie; kaj tamen nun ili estis silentaj, kaj neniuj paŝoj bruis sur la larĝaj pavimoj, nek aŭdiĝis en ties haloj voĉoj, nek elrigardis vizaĝo tra pordo aŭ malplena fenestro.

Fine ili eliris el la ombro al la sepa pordo kaj la varma suno, malsupren brilanta trans la rivero; dum Frodo marŝis en valetoj de Itilio, ĉi tie ardis sur la glataj muroj kaj fortikaj pilastroj, kaj la granda arkaĵo kun ĉefŝtono ĉizita laŭ similaĵo de kronita kaj reĝeca kapo. Gandalfo elseliĝis, ĉar al neniu ĉevalo estis permesite eniri la Citadelon, kaj Ombrofakso konsentis

forkondukiĝi pro mallaŭta vorto de sia mastro.

La gardantoj de la pordo estis vestitaj nigre, kaj iliaj kaskoj estis strangformaj, altvertaj, kun longaj vangoŝirmiloj strikte proksimaj al la vizaĝo, kaj super la vangoŝirmiloj estis lokitaj la blankaj flugiloj de marbirdoj; sed la kaskoj ekbrilis arĝentflame, ĉar ili estis efektive faritaj el *mitrilo*, heredaĵoj el la gloro de l' malnova tempo. Sur la nigraj kiteloj estis blanke brodita po arbo floranta kvazaŭ neĝe sub arĝenta krono kaj steloj multpintaj. Tio estis la livreo de la heredintoj de Elendilo, kaj neniu portis tion en la tuta Gondoro krom la gardistoj de la Citadelo antaŭ la Korto de l' Fontano, kie iam kreskis la Blanka Arbo.

Jam ŝajnis, ke informo pri ilia alveno anticipis ilin; kaj tuj ili estis enlasitaj, silente kaj senkondiĉe. Rapide Gandalfo transpaŝis la blanke pavimitan korton. Dolĉa fontano tie ŝprucis en la matena sunlumo, kaj razeno helverda ĉirkaŭis ĝin; sed meze, klinita super la lageto, staris mortinta arbo, kaj la falantaj akveroj gutis malgaje de ĝiaj malfekundaj kaj rompitaj branĉoj reen en la klaran akvon.

Grinĉjo ekrigardis ĝin dum li rapidis post Gandalfo. Ĝi aspektas morne, li pensis, kaj li scivolis, kial la mortinta arbo estis lasita sur tiu loko, kie ĉio alia estis bone prizorgita.

Sep stelojn, sep ŝtonojn, kaj unu blankan arbon.

La vortoj murmuritaj de Gandalfo revenis al lia menso. Kaj poste li troviĝis ĉe la pordo de la halego sub la brilanta turo; kaj malantaŭ la sorĉisto li preterpasis la altajn silentajn pordogardistojn kaj eniris la friskajn reeĥajn ombrojn de la domo el ŝtono.

Ili marŝis laŭ pavimita koridoro, longa kaj vaka, kaj dumire Gandalfo alparolis mallaŭte Grinĉjon.

— Zorgu pri viaj vortoj, mastro Peregrino! Malkonvenas la okazo por hobita impertinento. Teodeno estas bonkora maljunulo. Denetoro estas alispeca, fiera kaj subtila, homo de pli gravaj deveno kaj potenco, kvankam oni ne titolas lin reĝo. Sed li alparolos pli multe vin, kaj multe pridemandos vin, ĉar vi povos rakonti al li pri lia filo Boromiro. Li amis tiun profunde: eble tro profunde; kaj tiom pli ĉar ili malsimilis unu la alian. Sed sub kovro de tiu amo li supozos pli facile ekscii per vi tion, kion li volas, prefere ol per mi. Ne sciigu al li pli ol necesas, kaj lasu netuŝita la temon de la komisio de Frodo. Mi traktos tion ĝustatempe. Kaj ankaŭ diru nenion pri Aragorno, krom se necesos.

— Kial? Kio misas pri Paŝegulo? — Grinĉjo flustris. — Li intencis veni ĉi tien, ĉu ne? Kaj eble li mem baldaŭ alvenos.

— Eble, eble, — diris Gandalfo. — Kvankam se li venos, probable tio

okazos laŭ maniero, kiun neniu antaŭvidas, eĉ ne Denetoro. Estos pli bone tiel. Li almenaŭ prefere venu neheroldita de ni. — Gandalfo haltis antaŭ alta pordo el polurita metalo. — Vidu, mastro Grinĉjo, mankas nun tempo por instrui vin pri la historio de Gondoro; kvankam eble estintus pli bone, se vi lernus ion pri ĝi dum vi ankoraŭ serĉis birdajn nestojn kaj vagadis dum la kursotempo en arbaroj de la Provinco. Faru laŭ mia ordono! Ne tre saĝe estas, kiam oni alportas sciigon al potenca reganto pri la morto de ties heredonto, tro priparoli la alvenon de iu kiu, se li venos, pretendos la reĝecon. Ĉu tio sufiĉas?

— Ĉu la reĝecon? — diris Grinĉjo mirigite.

— Jes, — diris Gandalfo. — Se vi marŝis tiom da tagoj kun fermitaj oreloj kaj dormanta menso, jam vekiĝu!

Li frapis sur la pordon.

La pordo malfermiĝis, sed neniu malferminto vidiĝis. Grinĉjo enrigardis grandan halegon. Ĝin lumigis profundaj fenestroj en la larĝaj aloj ambaŭflanke, malantaŭ la vicoj de altaj pilastroj, kiuj subtenis la plafonon. Monolitoj el nigra marmoro, ili leviĝis ĝis grandaj kapiteloj ĉizitaj laŭ multaj strangaj formoj de bestoj kaj folioj; kaj multe pli supre en ombro la larĝa kupolo brilis malhele ora, enkrustita per fluaj aĵuraĵoj multkoloraj. Neniuj tapetoj nek amasiĝintaj kurtenoj, nek ajnaj objektoj el teksaĵo aŭ ligno vidiĝis en tiu longa solena halego; sed inter la pilastroj staris silenta aro de altaj skulptaĵoj ĉizitaj el malvarma ŝtono.

Subite Grinĉjo memoris pri la ĉizitaj rokoj de Argonato, kaj imponiĝo inundis lin, kiam li rigardis tiun avenuon de reĝoj delonge mortintaj. Ĉe la fora ekstremo sur podio multŝtupa estis alta trono sub baldakeno el marmoro farita kiel kronforma kasko; post ĝi estis ĉizita sur la muro kaj enkrustita de gemoj bildo de arbo floranta. Sed la trono estis vaka. Sube de la podio, sur la plej malsupra ŝtupo, kiu estis larĝa kaj profunda, estis ŝtona seĝo, nigra kaj senornama, kaj sur ĝi sidis maljunulo rigardanta sian sinon. En lia mano estis blanka bastono kun ora tubero. Li ne suprenrigardis. Solene ili trapaŝis la longan plankon al li, ĝis ili staris je tri paŝoj de lia tabureto. Tiam Gandalfo ekparolis.

— Saluton, Mastro kaj Reganto de Minaso Tirit, Denetoro, filo de Ekteliono! Mi venis kun konsiloj kaj novaĵoj en tiu ĉi malhela horo.

Tiam la maljunulo suprenrigardis. Grinĉjo vidis lian ĉizitecan vizaĝon kun ties fieraj ostoj kaj haŭto ebureca, kaj la longan kurban nazon inter la malhelaj profundaj okuloj; kaj li estis memorigita malpli pri Boromiro ol pri Aragorno.

— Ja la horo estas malhela, — diris la maljunulo, — kaj en tiaj tempoj vi kutimas veni, Mitrandiro. Sed malgraŭ tio, ke ĉiuj signoj antaŭdiras, ke la

malfortuno de Gondoro proksimiĝas, malpli trafas min nun tiu mallumo ol mia propra mallumo. Estas dirite al mi, ke vi kunportas iun, kiu vidis mian filon morti. Ĉu jen li?

— Estas, — diris Gandalfo. — Unu el la du. La alia estas kun Teodeno en Rohano kaj eble sekvos poste. Duonuloj ili estas, kiel vi vidas, tamen tiu ĉi ne estas tiu, pri kiu parolis la profetaĵo.

— Tamen duonulo, — diris Denetoro minaceme, — kaj malmulte mi amas tiun nomon, de kiam venis tiuj malbenindaj vortoj ĝeni niajn interkonsilojn kaj forlogi mian filon al tiu malprudenta komisio kaj lia morto. Mia Boromiro! Nun ni bezonas vin. Faramiro devintus iri anstataŭe.

— Li irus, — diris Gandalfo. — Ne maljustu pro via doloro! Boromiro pretendis la komision kaj ne permesis, ke iu alia akceptu ĝin. Li estis homo mastrema, kaj preninto de ĉio, kion li volis. Ni longe vojaĝis kun li kaj eksciis multe pri liaj humoroj. Sed vi parolas pri lia morto. Vi ricevis malbonan novaĵon tiurilate antaŭ ol ni alvenis, ĉu?

— Tion ĉi mi ricevis, — diris Denetoro, kaj formetinte sian bastonon li levis de sia sino tion, kion li alrigardis. Po unumane li suprentenis duonojn de granda korno trarompita meze: ura kornego arĝente ornamita.

— Tio estas la korno, kiun Boromiro ĉiam kunportis! — kriis Grinĉjo.

— Vere, — diris Denetoro. — Kaj miavice mi portis ĝin, kaj same faris ĉiu pliaĝa filo de nia domo, fore en la prajarojn antaŭ ol malaperis la reĝoj, de kiam Vorondilo, la patro de Mardilo, ĉasis urojn de Aravo en la foraj kampoj de Rhuno. Mi aŭdis malklare ĝin sonoranta ĉe la norda limregiono antaŭ dek tri tagoj, kaj la Rivero portis ĝin al mi, rompitan: ĝi ne plu sonoros. — Li paŭzis kaj sekvis peza silento. Subite li turnis sian malhelan rigardon al Grinĉjo. — Kion vi diras pri tio, duonulo?

— Dek tri, dek tri tagoj, — hezitis Grinĉjo. — Jes, mi opinias, ke estas tiel. Jes, mi staris apud li, kiam li blovis la kornon. Sed nenia helpo venis. Nur pli da orkoj.

— Do, — diris Denetoro, akre rigardante la vizaĝon de Grinĉjo. — Vi ĉeestis, ĉu? Rakontu pli! Kial ne venis helpo? Kaj kiel eskapis vi, tamen ne li, tiom potenca homo li estis, dum nur orkoj kontraŭis lin.

Grinĉjo ruĝiĝis kaj forgesis sian timon.

— Homo plej potenca estas mortigebla per unu sago, — li diris, — kaj Boromiron trapikis multaj. Kiam mi lastfoje vidis lin, li kolapsis apud arbo kaj eltiris nigrapluman sagon el sia flanko. Tiam mi svenis kaj estis kaptita. Mi ne plu vidis lin, kaj scias nenion pli. Sed mi honoras lian memoron, ĉar li estis kuraĝega. Li mortis por savi nin, mian parencon Gajadokon kaj min, embuskitajn en la arbaro de soldatoj de la Malhela Mastro; kaj kvankam li pereis kaj malsukcesis, mia dankemo ne malpliiĝas.

Tiam Grinĉjo rigardis la maljunulon rekte en la okulojn, ĉar fiero ekmoviĝis strange en li, ankoraŭ pikita de la malestimo kaj suspektemo de tiu malvarma voĉo.

— Ne grandan servon, sendube, supozas trovi tiel grava estro de homoj en hobito, duonulo el la norda Provinco; sed tia, kia ĝi estas, mi volas ĝin proponi, page al mia ŝuldo. — Forskuinte sian grizan mantelon, Grinĉjo elingigis sian glaveton kaj metis ĝin antaŭ la piedojn de Denetoro.

Pala rideto, kiel ekbrilo de malvarma sunlumo en vintra vespero, trapasis la vizaĝon de la maljunulo; sed li klinis sian kapon kaj etendis sian manon, flankenmetante la pecojn de la korno.

— Donu al mi la armilon! — li diris.

Grinĉjo levis ĝin kaj prezentis al li la tenilon. — De kie venis ĝi? Multaj, multaj jaroj surkuŝas ĝin. Certe tio ĉi estas klingo farita de nia parencaro en la nordo dum la malproksima pasinteco.

— Ĝi alvenis el la dolmenoj, kiuj troviĝas ĉe la limoj de mia lando, — diris Grinĉjo. — Sed tie nun loĝas nur malicaj fantomoj, kaj mi ne volonte pli rakontos pri ili.

— Mi konstatas, ke strangaj rakontoj plektiĝas ĉirkaŭ vi, — diris Denetoro, — kaj ankoraŭfoje evidentiĝas, ke povas trompi aspekto de homo, aŭ de duonulo. Vian servon mi akceptas. Ĉar vin ne timigas vortoj; kaj via parolo estas ĝentila, eĉ se ĝi sonas strange al ni en la sudo. Kaj ni bezonas ĉiujn personojn ĝentilajn, ĉu grandajn ĉu malgrandajn, en la venontaj tagoj. Ĵuru al mi nun!

— Enmanigu la tenilon, — diris Gandalfo, — kaj ripetu post la Reganto, se vi estas certa pri tio ĉi.

— Mi estas, — diris Grinĉjo.

La maljunulo kuŝigis la glavon laŭlonge de sia sino, kaj Grinĉjo metis manon al la tenilo, kaj diris malrapide post Denetoro.

— Jen mi ĵuras lojalecon kaj servadon al Gondoro, kaj al la Mastro kaj Reganto de la regno, por paroli kaj silenti, por fari kaj nefari, por veni kaj iri, en manko aŭ malmanko, dum paco aŭ milito, vivante aŭ mortante, ekde tiu ĉi horo, ĝis mia mastro min liberigos, aŭ morto trafos min, aŭ la mondo finiĝos. Tion diras mi, Peregrino, filo de Paladino, el la Provinco de la Duonuloj.

— Kaj tion aŭdas mi, Denetoro, filo de Ekteliono, Mastro de Gondoro, reganta nome de la Alta Reĝo, kaj mi tion ne forgesos, nek malsukcesos rekompenci tion, kio estas donita: lojalecon kun amo, kuraĝon kun honoro, ĵurorompon kun venĝo.

Grinĉjo rericevis sian glavon kaj eningigis ĝin.

— Kaj nun, — diris Denetoro, — jen mia unua ordono al vi: parolu kaj

ne silentu! Rakontu al mi vian plenan historion, kaj certigu, ke vi memoras ĉion eblan pri mia filo Boromiro. Sidiĝu jam kaj komencu!

— Parolante li frapis arĝentan gongeton, kiu staris apud lia piedapogilo, kaj tuj paŝis antaŭen servistoj. Grinĉjo konstatis, ke tiuj staris en alkovoj ambaŭflanke de la pordo, neviditaj kiam envenis li kaj Gandalfo.

— Alportu vinon kaj manĝaĵon kaj seĝojn por la gastoj, — diris Denetoro, — kaj certigu, ke neniu ĝenu nin dum unu horo.

— Nur tiom da tempo mi disponas, ĉar multaj aliaj aferoj estas traktendaj, — li diris al Gandalfo. — Multe pli gravaj, eble ŝajnos, kaj tamen por mi malpli urĝaj. Sed eble ni povos denove interparoli tagofine.

— Eĉ pli frue, espereble, — diris Gandalfo. — Ĉar mi rajdis ĉi tien el Isengardo cent kvindek leŭgojn laŭ rapideco de vento ne nur por alporti al vi unu malgrandan batalanton, kiom ajn ĝentilan. Ĉu signifas nenion al vi, ke Teodeno travivis grandan batalon, kaj ke Isengardo estas venkita, kaj ke mi rompis la bastonon de Sarumano?

— Tio signifas al mi multon. Sed mi jam scias sufiĉe pri tiuj faritaĵoj por miaj propraj planoj kontraŭ la minaco en la oriento. — Li turnis siajn malhelajn okulojn al Gandalfo, kaj nun Grinĉjo vidis similecon inter la du, kaj li sentis streĉitecon inter ili, preskaŭ kvazaŭ li vidus linion da subbrula fajro tirata de okulo al okulo, kiu eble ekflamus subite.

Efektive Denetoro aspektis multe pli granda sorĉisto ol Gandalfo, pli reĝeca, bela, kaj potenca; kaj pli maljuna. Tamen per sentumo alia ol vido Grinĉjo perceptis, ke Gandalfo posedas pli grandan potencon, kaj pli profundan saĝon, kaj majeston vualitan. Kaj li estas pli maljuna, multe pli maljuna. “Kiom pli aĝa?” — li scivolis, kaj poste li pensis, kiel strange estas ke li neniam antaŭe pensis pri tio. Arbobarbo diris ion pri sorĉistoj, sed eĉ tiam li ne taksis Gandalfon unu el ili. Kio estas Gandalfo? En kiuj malproksimaj tempo kaj loko li venis en la mondon, kaj kiam li forlasos ĝin? Kaj tiam ĉesis lia meditado, kaj li vidis, ke Denetoro kaj Gandalfo daŭre rigardas l’ okulojn unu de la alia, kvazaŭ legante la menson de l’ alia. Sed estis Denetoro, kiu la unua forturnis sian rigardon.

— Jes, — li diris; — ĉar malgraŭ tio, ke la ŝtonoj estas perditaj, onidire, tamen la Mastroj de Gondoro pli akre vidas ol homoj malpli gravaj, kaj multaj mesaĝoj venas al ili.

Poste venis viroj portantaj seĝon kaj malaltan tabureton, kaj unu alportis pleton kun arĝenta pokalo, tasoj kaj blankaj kukoj. Grinĉjo sidiĝis, sed li ne povis forturni sian rigardon de la maljuna Reganto. Ĉu estis tiel, aŭ tion li nur imagis, ke parolante pri la Ŝtonoj subita ekbrilo en lia okulo trafis la vizaĝon de Grinĉjo?

— Nun rakontu al mi vian historion, mia lojalulo, — diris Denetoro,

duone afable, duone moke. — Ĉar la vortoj de iu, al kiu amikiĝis mia filo, estos vere bonvenaj.

Grinĉjo neniam forgesis tiun horon en la granda halego sub la trapikaj okuloj de la Mastro de Gondoro, trafite ĉiam denove per ties sagacaj demandoj, kaj konscia la tutan tempon pri Gandalfo apude, kiu rigardis kaj aŭskultis, kaj (tion sentis Grinĉjo) bridis kreskantajn koleron kaj senpaciencon. Kiam finiĝis la horo, kaj Denetoro denove sonorigis la gongon, Grinĉjo sentis sin elĉerpita. "Ne povas esti pli malfrue ol la naŭa horo, — li pensis. — Mi povus nun konsumi tri matenmanĝojn sinsekve".

— Konduku la mastron Mitrandiro al la loĝejo pretigita por li, — diris Denetoro, — kaj lia kunulo rajtas loĝi kun li provizore, se li volas. Sed estu konate, ke mi ĵure servistigis lin, kaj oni nomos lin Peregrino, filo de Paladino, kaj instruos al li la malpli gravajn pasvortojn. Sendu mesaĝon al la komandantoj, ke ili kunvenu kun mi ĉi tie, laŭeble baldaŭ post sonorigo de la tria horo.

» Kaj ankaŭ vi, moŝto Mitrandiro, venu, kiel kaj kiam vi volos. Neniu malhelpos vian alvenon al mi iam ajn, krom nur dum miaj mallongaj dormohoroj. Lasu fordreniĝi vian koleron pro la malsaĝo de maljunulo, kaj poste revenu por min konsoli!

— Ĉu malsaĝo? — diris Gandalfo. — Ne, estra moŝto, la saĝo forlasos vin nur kune kun la vivo. Vi kapablas uzi eĉ vian doloron kiel mantelon. Ĉu vi opinias, ke mi ne komprenas vian celon: enketi dum horo iun, kiu plej malmulton scias, dum mi sidas proksime?

— Se vi tion komprenas, tiam estu kontenta, — respondis Denetoro. — Tia fiero estus fola, kia malŝatus helpon kaj konsilojn laŭbezone; sed vi disdonas tiajn donacojn laŭ viaj propraj intencoj. Tamen la Mastro de Gondoro neniam estos perilo de aliulaj celoj, kiel ajn indaj. Kaj al li neniu celo pli altas en la mondo, kia ĝi nun estas, ol la bono de Gondoro; kaj regado de Gondoro, moŝto, estas mia kaj de neniu aliulo, krom se la reĝo revenus.

— Krom se la reĝo revenus? — diris Gandalfo. — Nu, mia moŝta Reganto, via tasko estas konservi iom da regno ĝis tiu okazaĵo, kiun malmultaj jam atendas vidi. Por tiu tasko vi ricevos tiom da helpo, kiom vi bonvolos peti. Sed tion ĉi mi volas diri: regado de neniu regno estas mia, nek de Gondoro, nek de alia, ĉu granda aŭ malgranda. Sed mia zorgo estas ĉiuj indaj aferoj, kiuj troviĝas en danĝero pro la nuna stato de la mondo. Kaj miaparte mi ne tute fiaskos rilate mian taskon, eĉ se Gondoro pereus, se io ajn trapasos tiun ĉi nokton, kio kapablos plu beliĝi aŭ frukti kaj flori denove en la venontaj tagoj. Ĉar ankaŭ mi estas reganto. Ĉu vi ne sciis? — kaj post tio li sin turnis kaj forpaŝis el la halego, dum Grinĉjo kuris apude.

Gandalfo ne rigardis Grinĉjon nek ion diris al li dum la foriro. Ilia gvidanto ekiris kun ili de la halega pordo, kaj poste kondukis ilin tra la Korto de l' Fontano en vojeton inter altaj ŝtonkonstruaĵoj. Post kelkaj turniĝoj ili alvenis domon proksiman al la citadela muro je la norda flanko, ne malproksime de l' ŝultro kiu ligis la deklivon al la monto. Interne, sur la unua etaĝo super la strato laŭ larĝa skulptita ŝtuparo, li montris al ili belan ĉambron lumplenan kaj aerumatan, kun bonkvalitaj tapetoj el malbrila ora muaro senbrodaĵa. Ĝi estis malabunde meblita, havante nur tableton, du seĝojn kaj benkon; sed ambaŭflanke troviĝis kurtenitaj alkovoj kaj bone kovritaj litoj interne kun ujoj kaj pelvoj por sinlavado. Troviĝis tri altaj mallarĝaj fenestroj, kiuj frontis norden tra la granda kurbiĝo de Anduino, ankoraŭ vualita per nebuleto, al Emin Muilo kaj Raŭroso malproksimaj. Grinĉjo devis grimpi sur la benkon por elrigardi trans la profunda ŝtona sojlo.

— Ĉu vi koleras pri mi, Gandalfo? — li demandis, kiam ilia gvidinto eliris kaj fermis la pordon. — Mi faris laŭeble plej bone.

— Tion vi ja faris! — diris Gandalfo, subite ekridante; kaj li stariĝis apud Grinĉjo, ĉirkaŭante per sia brako la ŝultrojn de la hobito, kaj elrigardante tra la fenestro.

Grinĉjo rigardis iom mire la vizaĝon jam proksiman al sia propra, ĉar tiu rido sonis gaja kaj senzorga. Tamen sur la vizaĝo de la sorĉisto li vidis komence nur sulketojn de zorgo kaj malĝojo; kvankam rigardinte pli atente li perceptis, ke sub ĉio ĉi estis granda ĝojo: fontano da amuziĝo sufiĉa por ridigi tutan regnon, se ĝi elŝprucus.

— Efektive, vi faris laŭeble plej bone, — diris la sorĉisto, — kaj mi esperas, ke pasos longa tempo antaŭ ol vi denove trovos vin en tia malfacila situacio inter du tiel timigaj maljunuloj. Tamen la Mastro de Gondoro eksciis per vi pli ol vi eble supozis, Grinĉjo. Vi ne povis kaŝi la fakton, ke Boromiro ne estris la Kunularon ekde Morio, kaj ke inter vi troviĝis iu alte honorinda kiu venos al Minaso Tirit; kaj ke tiu portis faman glavon. La homoj en Gondoro multe pripensas la historiojn pri la pratempo; kaj Denetoro longe meditis pri la rimaĵo kaj pri la vortoj *plago de Isilduro*, de kiam foriris Boromiro.

» Nuntempe li ne similas aliajn homojn, Grinĉjo, kaj kia ajn estis lia deveno de patro al filo, hazarde la sango de Okcidentio fluas preskaŭ seninterrompe en li; tia estas lia alia filo, Faramiro, kaj tamen ne Boromiro, kiun li pleje amis. Li estas longvida. Li povas percepti, se al tio li klinas sian volon, multon el tio, kio trapasas la mensojn de la homoj, eĉ tiujn kiuj loĝas malproksime. Estas malfacile trompi lin, kaj danĝere tion provi.

» Memoru tion! Ĉar nun vi estas ĵurita al lia servado. Mi ne scias, kio

enkapigis aŭ enkorigis al vi tion. Sed estis bone farite. Mi tion ne malhelpis, ĉar malavaran faron devus ne bremsi malvarma konsilo. Tio kortuŝis lin, kiel ĝi ankaŭ (mi rajtu diri) plaĉis al lia humoro. Kaj almenaŭ vi jam rajtas libere vagadi laŭvole en Minaso Tirit — kiam vi ne deĵoros. Ĉar ekzistas alia flanko de la afero. Li rajtas ordoni al vi, kaj tion li ne forgesos. Estu pli singarda!

Li silentiĝis kaj suspiris.

— Nu, ne necesas mediti pri morgaŭaj eblaj okazaĵoj. Ekzemple, morgaŭ certe alportos pli malbonan ol hodiaŭ, dum multaj venontaj tagoj. Kaj nenion plu mi povas fari por plibonigi tion. La ludtabulo estas starigita, kaj la ludpecoj moviĝas. Unu peco, kiun mi tre deziras trovi, estas Faramiro, jam la heredonto de Denetoro. Al mi ŝajnas, ke li ne estas en la urbo; sed mankis al mi tempo ekserĉi novaĵojn. Mi devas eliri, Grinĉjo. Mi devas ĉeesti tiun konsilion de komandantoj kaj ekscii, kiom mi povos. Sed estas la vico de la Malamiko fari movon, kaj li tuj komencos sian plenan ludon. Kaj peonoj probable spertos tiom el ĝi kiom iu ajn, Peregrino, filo de Paladino, soldato de Gondoro. Akrigu vian klingon! — Gandalfo iris al la pordo, kaj tie li turnis sin. — Mi hastas, Grinĉjo. Komplezu al mi, kiam vi eliros. Eĉ antaŭ ol ripozi, se vi ne estas tro laca. Iru trovi Ombrofakson kaj konstatu kiel ĝi estas enstaligita. Ĉi tieaj homoj afable traktas bestojn, ĉar ili estas popolo bona kaj saĝa, sed ili malpli lertas ol iuj rilate ĉevalojn.

Tion dirinte Gandalfo eliris; kaj ĝuste kiam li faris tion, aŭdiĝis klara belsona sonorilo en la turo de la citadelo. Trifoje ĝi batis, kiel arĝento sur la aero, kaj ĉesis: la tria horo post la leviĝo de la suno.

Post minuto Grinĉjo iris al la pordo kaj malsupren laŭ la ŝtuparo kaj ĉirkaŭrigardis sur la strato. La suno nun brilis varme kaj hele, kaj la turoj kaj altaj domoj ĵetis longajn klare difinitajn ombrojn okcidenten. Alte en la blua aero monto Mindoluino levis sian blankan kreston kaj neĝan mantelon. Armitoj iris tien-reen sur la vojoj de la urbo, kvazaŭ irante je la horsonoro al ŝanĝiĝo de postenoj kaj devoj.

— La naŭa horo mi nomus tion en la Provinco, — diris Grinĉjo voĉe al si. — Ĝusta tempo por agrabla matenmanĝo apud malfermita fenestro en printempa sunlumo. Kaj kiom plaĉus al mi matenmanĝo! Ĉu ĉi tieaj homoj iam manĝas tion, aŭ ĉu ĝi finiĝis? Kaj kiam ili tagmanĝas, kaj kie?

Baldaŭ li rimarkis viron, nigre kaj blanke vestitan, kiu iris laŭ la mallarĝa strateto el la centro de la citadelo al li. Grinĉjo sentis sin soleca kaj decidis alparoli la viron; sed tio ne necesis. La viro venis rekte al li.

— Vi estas duonulo Peregrino, ĉu? — li demandis. — Oni informis min, ke vi ĵuris servi la Mastron kaj la Urbon. Bonvenon! — Li etendis sian manon kaj Grinĉjo akceptis ĝin. — Mi nomiĝas Beregondo, filo de

Baranoro. Mi ne postenas ĉi-matene, kaj oni sendis min por instrui al vi la pasvortojn kaj informi vin pri kelkaj el la multaj aferoj, kiujn vi sendube volos ekkoni. Kaj miaflanke, mi deziras ankaŭ lerni pri vi. Ĉar neniam antaŭe mi vidis duonulon en tiu ĉi lando kaj malgraŭ tio, ke ni aŭdis onidirojn pri ili, malmulto estas rakontita pri ili en la historioj al ni konataj. Cetere, vi estas amiko de Mitrandiro. Ĉu vi konas lin bone?

— Nu, — diris Grinĉjo. — Mi sciis *pri* li dum mia tuta mallonga vivo, kiel oni povus diri; kaj lastatempe mi longe vojaĝis kun li. Sed multo legindas en tiu libro, kaj mi ne rajtas pretendi, ke mi vidis pli ol unu-du paĝojn. Tamen eble mi konas lin tiel bone, kiel iu ajn, krom malmultaj. Aragorno estis la sola en nia Kunularo, mi opinias, kiu vere konis lin.

— Aragorno? — diris Beregondo. — Kiu li estas?

— Ho, — balbutis Grinĉjo, — estas iu, kiu iris kun ni. Mi pensas, ke li nun estas en Rohano.

— Vi estis en Rohano, mi aŭdis. Estas multo, pri kio mi volus demandi vin ankaŭ pri tiu lando; ĉar ni investas multon el nia malgranda espero en ties popolo. Sed mi forgesas pri mia komisio, kiu estis unue respondi tion, kion vi volas demandi. Kion vi volas scii, mastro Peregrino?

— Nu ja, — diris Grinĉjo, — se mi risku tion diri, iom brula demando en mia menso nuntempe koncernas, nu, kio pri matenrnanĝo kaj tiel plu? Mi volas diri, kiam estas la manĝohoroj, se vi komprenas min, kaj kie estas la manĝoĉambro, se tio ekzistas? Kaj la tavernoj? Mi gvatis, sed eĉ unu tian mi ne vidis, dum ni trarajdis, kvankam min subtenis espero pri gluto da biero tuj, kiam ni atingos la hejmojn de homoj saĝaj kaj ĝentilaj. Beregondo rigardis lin serioze.

— Sperta kampanjinto, mi konstatas, — li diris. — Oni diras, ke tiuj, kiuj iras milite en malproksimo, ĉiam antaŭvidas venontan esperon pri manĝaĵoj kaj trinkaĵoj; kvankam mi mem ne vojaĝis multe. Do hodiaŭ vi ankoraŭ ne manĝis, ĉu?

— Nu jes, se paroli ĝentile, jes, — diris Grinĉjo. — Sed ne pli ol tason da vino kaj unu-du blankajn kuketojn pro la afablo de via Mastro; sed kontraŭ tio li torturis min dum horo da demandoj, kaj tio estas laboro malsatiga.

— Ĉetable etuloj povas plenumi bravaĵojn grandajn, ni diras, — ridis Beregondo. — Sed vi ĉesigis vian faston tiel bone, kiel iu ajn viro en la Citadelo, kaj pli honore. Tio ĉi estas fortikaĵo kaj gardoturego kaj nun militpretas. Ni leviĝas pli frue ol la suno kaj glutas manĝeton en la griza lumo, kaj iras al niaj postenoj je la malferma horo. Sed ne malesperu! — li ridis denove, vidante la konsterniĝon sur la vizaĝo de Grinĉjo. — Tiuj, kiuj havis *pezan* deĵoron, glutas ion por refreŝigi sian forton en mezmateno.

Poste okazas tagmanĝo, je tagmezo aŭ iom poste laŭ eblecoj de l' deĵorado; kaj oni kuniĝas por vespermanĝo kaj tia plezuro, kia ankoraŭ eblas ĉirkaŭ la horo de la sunsubiro. Venu! Ni iom promenos kaj poste iros trovi iom da nutraĵo, kaj manĝos kaj trinkos sur la remparo, kaj videsploros la belan matenon.

— Momenton! — diris Grinĉjo hontruĝiĝante. — Avido aŭ malsato, se vi konsentas ĝentili, forigis jenon el mia menso. Sed Gandalfo, kiun vi nomas Mitrandiro, petis, ke mi prizorgu lian ĉevalon Ombrofakso, grandan ĉevalon el Rohano, la plej ŝatatan posedaĵon de la reĝo, oni diras, kvankam li donacis ĝin al Mitrandiro pro ties servoj. Mi opinias, ke ĝia nova mastro amas tiun beston pli sincere ol li amas multajn homojn, kaj se lia bonkoro estas iel valora por tiu ĉi urbo, vi traktu Ombrofakson kun plena honoro: kun pli granda afableco ol vi traktis tiun ĉi hobiton, se tio eblas.

— Ĉu hobito? — diris Beregondo.

— Tiel ni nomas nin, — diris Grinĉjo.

— Mi ĝojas ekscii tion, — diris Beregondo, — ĉar mi jam rajtas diri, ke fremdaj prononcoj ne malbeligas amikecajn parolojn, kaj hobitoj estas popolo amike parola. Sed venu! Vi konatigos al mi tiun bravan ĉevalon. Bestojn mi amas, kaj ni malofte vidas ilin en tiu ĉi ŝtona urbo; sed miaj prapatroj devenis de la montaj valoj, kaj antaŭ tio de Itilio. Sed ne timu! La vizito estos mallonga, nura ĝentila saluto, kaj de tie ni iros al la provizejoj.

Grinĉjo trovis, ke Ombrofakso estis bone enstaligita kaj prizorgita. Ĉar en la sesa rondo estis kelkaj bonstataj staloj, kie estis lokitaj pluraj rapidaj ĉevaloj, proksime al la loĝejoj de la mesaĝistoj de la Mastro: kurieroj ĉiam pretaj ekiri pro urĝa ordono de Denetoro aŭ ties ĉefaj komandantoj. Sed nuntempe ĉiuj ĉevaloj kaj rajdistoj estis for.

Ombrofakso henis kaj turnis sian kapon, kiam Grinĉjo eniris la stalon.

— Bonan matenon! — diris Grinĉjo. — Gandalfo venos kiel eble plej baldaŭ. Li estas okupata, sed li sendas saluton, kaj mia tasko estas certigi, ke ĉio estas en ordo ĉe vi; dum vi ripozas, espereble, post viaj longaj laboroj.

Ombrofakso skuis sian kapon kaj stamfis. Sed ĝi permesis, ke Beregondo karesu ĝian kapon milde kaj karesu ĝiajn flankegojn.

— Ĝi aspektas, kvazaŭ ĝi avidus vetkuron kaj ne nove venintus post longa vojaĝo, — diris Beregondo. — Kiom ĝi estas forta kaj fiera! Kie estas ĝia jungaĵo? Ĝi devus esti riĉa kaj belega.

— Neniu estas por ĝi sufiĉe riĉa aŭ belega, — diris Grinĉjo. — Ĝi volas neniom. Se ĝi konsentas porti vin, ĝi tion faras; kaj se ne, nu, neniu buŝfero, brido, vipo aŭ ligaĵo malsovaĝigos ĝin. Adiaŭ, Ombrofakso! Paciencu. Batalo venas.

Ombrofakso levis sian kapon kaj henis tiel, ke la staloj skuiĝis, kaj ili

kovris siajn orelojn. Poste ili adiaŭis, certiĝinte, ke la manĝujo estis kontentige plenigita.

— Kaj nun al nia manĝujo, — diris Beregondo, kaj li gvidis Grinĉjon ree al la citadelo, kaj al pordo en la norda flanko de la turego. Tie ili malsupreniris laŭ longa malvarmeta ŝtuparo en larĝan aleon lamplumigitan. En la flankaj muroj estis giĉetoj, el kiuj unu estis malfermita.

— Tio ĉi estas la varejo kaj provizejo de mia gardista trupo, — diris Beregondo. — Saluton, Targono! — li vokis tra la giĉeto. — Estas ankoraŭ frue, sed jen estas nova veninto, kiun la Mastro akceptis en sian servistaron. Li rajdis longe kaj granddistance kun strikta zono, kaj li forte laboris ĉi-matene kaj li malsatas. Donu, kion vi havas.

Ili ricevis panon, kaj buteron, kaj fromaĝon, kaj pomojn: tiuj lastaj estis el fino de l' vintra provizo, sulketaj sed bonstataj kaj dolĉaj; kaj ledan ujon da freŝe verŝita biero, kaj lignajn telerojn kaj tasojn. Ĉion ili enigis en vimenan korbon kaj regrimpis al la sunlumo; kaj Beregondo kondukis Grinĉjon al loko ĉe la orienta ekstremo de l' granda elpuŝita remparo, kie troviĝis embrazuro en la muro kun ŝtona sidloko sub la sojlo. De tie ili povis elrigardi al la mateno super la mondo. Ili manĝis kaj trinkis; kaj ili parolis jen pri Gondoro kaj ties moroj kaj kutimoj, jen pri la Provinco kaj la strangaj landoj, vizititaj de Grinĉjo. Kaj ĉiam dum la interparolo Beregondo pli kaj pli miris kaj rigardis kun granda surprizo al la hobito, svinganta siajn mallongajn krurojn, dum li sidis surseĝe, aŭ stariĝis piedpinte por gapi trans la sojlon al la terenoj sube.

— Mi ne volas kaŝi antaŭ vi, mastro Peregrino, — diris Beregondo, — ke al ni vi aspektas preskaŭ kiel unu el niaj infanoj, knabo proksimume naŭsomera; kaj tamen vi spertis danĝerojn kaj vidis mirindaĵojn, kiajn povus prifanfaroni malmultaj el niaj grizbarbuloj. Mi pensis, ke estis kaprico de nia Mastro havigi al si noblan paĝion, laŭ kutimoj de la prareĝoj, oni diras. Sed mi konstatas, ke ne estas tiel, kaj vi devas pardoni mian stultecon.

— Mi pardonas, — diris Grinĉjo. — Kvankam vi ne tre eraras. Mi estas ankoraŭ ne multe pli ol knabo laŭ la kalkulado en mia propra popolo, kaj pasos pluaj kvar jaroj ĝis mi "maturiĝos", kiel ni diras en la Provinco. Sed ne ĝenu vin pri mi. Venu rigardi kaj diru al mi, kion mi vidas.

La suno jam altiĝadis, kaj la nebuleto en la suba valo disiĝis. Ties restaĵo estis forflosanta, tutsupre, kiel eroj da blanka nubo portitaj per la fortiĝanta venteto el la oriento, kiu nun klakigis kaj ektiris la flagojn kaj blankajn standardojn de la citadelo. Forfore sur la vala fundo, je ĉirkaŭ kvin leŭgoj laŭ la okultrafo, la Granda Rivero jam vidiĝis griza kaj ekbrila, venante el la nord-okcidento kaj kurbiĝante laŭ impona etendiĝo suden kaj denove okcidenten, ĝis ĝi nevidebliĝis en nebuleto kaj trembrilo, post kiu kuŝis la maro kvindek leŭgojn for.

Grinĉjo povis vidi la tutan Pelenoron elmetitan antaŭ li, trapunktita en la malproksimon per farmbienoj kun etaj muroj, grenejoj kaj bovostaloj, sed nenie li vidis bovinojn aŭ aliajn bestojn. Multaj vojoj kaj padoj transiris la verdajn kampojn, kaj okazis multe da moviĝado: furgonoj irantaj vice al la Granda Pordego, kaj aliaj elirantaj. De tempo al tempo venis rajdisto, salte elseliĝis kaj rapidis en la urbon. Sed la plimulta trafiko foriris laŭ la ĉefŝoseo, kaj tiu turniĝis suden, kaj kurbiĝante poste pli akute ol la Rivero ĉirkaŭiris la montetojn kaj baldaŭ forpasis el la vidkampo. Ĝi estis larĝa kaj bone pavimita, kaj laŭ ĝia orienta flanko iris larĝa verda rajdvojo, kaj post ĝi estis muro. Sur la rajdvojo galopis tien-reen rajdistoj, sed la tuta ŝoseo ŝajnis ŝtopita per grandaj furgonoj irantaj suden. Sed baldaŭ Grinĉjo konstatis, ke ĉio estas fakte bonorda: la furgonoj moviĝis en tri spaliroj, unu pli rapida ĉevaltrenite; alia malpli rapida, grandaj furgonoj kun belaj flankoj multkoloraj, virbovtrenite; kaj laŭ la okcidenta vojflanko multaj ĉaroj malpli grandaj, kiujn trenis plandantaj homoj.

— Tio estas la vojo al la valoj Tumladeno kaj Losarnaĥo, kaj la montaj vilaĝoj, kaj poste al Lebenino, — diris Beregondo. — Jen foriras la lastaj furgonoj, kiuj forportas al rifuĝejo la maljunulojn, infanojn, kaj virinojn, kiuj devas akompani ilin. Ili ĉiuj devas foriri de la Pordego kaj la vojo devas esti libera je unu leŭgo antaŭ la tagmezo: tiel estis ordonite. Ĝi estas malĝojiga neceso. — Li suspiris. — Eble malmultaj el tiuj, kiuj nun disiĝas, ree renkontiĝos. Kaj ĉiam estis tro malmulte da infanoj en tiu ĉi urbo; sed nun estas neniuj, krom kelkaj junuloj, kiuj ne volas foriri, kaj eble trovos iun fareblan taskon: inter tiuj estas mia filo.

Ili silentiĝis por kelka tempo. Grinĉjo gapis maltrankvile orienten, kvazaŭ en ĉiu momento li eble vidus milojn da orkoj alverŝiĝantaj sur la kampoj.

— Kion mi vidas tie? — li demandis, indikante la mezon de l' granda Anduina kurbiĝo. — Ĉu alia urbo, aŭ kio ĝi estas?

— Iam ĝi estis urbo, — diris Beregondo, — la ĉefurbo de Gondoro, kies fortikaĵo estis tiu ĉi nure. Ĝi estas la ruinaĵo de Osgiliado ambaŭflanke de

Anduino, kiun niaj malamikoj antaŭlonge kaptis kaj bruligis. Tamen ni regajnis ĝin dum la junaj tagoj de Denetoro: ne por loĝi tie, sed por teni kiel antaŭpostenon, kaj por rekonstrui la ponton por transpaso de niaj armitoj. Kaj poste venis la Kruelaj Rajdantoj el Minaso Morgul.

— Ĉu la Nigraj Rajdantoj? — diris Grinĉjo, malfermante siajn okulojn ĝis ili estis larĝaj kaj malhelaj pro malnova timo revekita.

— Jes, ili estis nigraj, — diris Beregondo, — kaj mi konstatas, ke vi konas ion pri ili, kvankam vi ne menciis ilin en viaj historioj.

— Mi scias pri ili, — diris Grinĉjo mallaŭte, — sed mi ne parolos nun pri ili, tiel proksime, tiel proksime...

Li eksilentis kaj levis siajn okulojn super la riveron, kaj ŝajnis al li, ke li vidas nur vastan kaj minacan ombron. Eble tio estis montoj baŭmantaj lime de la vidpovo, ties akrangulaj randoj moligitaj de preskaŭ dudek leŭgoj da nebuleta aero; eble ĝi estis nura nubmuro, kaj post tio eĉ pli profunda morno. Sed ĝuste dum li rigardis ĝin, ŝajnis laŭ liaj okuloj, ke la morno kreskas kaj kuniĝas, tre malrapide, malrapide leviĝante por sufoki la regionojn de la sunlumo.

— Ĉu tiel proksime al Mordoro? — diris Beregondo kviete. — Jes, tie ĝi kuŝas. Ni malofte aludas ĝin; sed ni loĝas ĉiam en vido de tiu ombro: foje ĝi ŝajnas pli malforta kaj pli fora; foje pli proksima kaj pli malhela. Nun ĝi kreskas kaj malheliĝas; kaj tial kreskas ankaŭ niaj timo kaj maltrankvilo. Kaj la Kraelaj Rajdantoj antaŭ malpli ol unu jaro reakiris la transirejojn, kaj multaj el niaj plej valoraj viroj estis mortigitaj. Ĝuste Boromiro finfine repelis la malamikojn el tiu ĉi okcidenta bordo, kaj ni ankoraŭ okupas la pli proksiman duonon de Osgiliado. Provizore. Sed ni atendas novan atakon tie. Eble la ĉefatakon en la venonta milito.

— Kiam? — demandis Grinĉjo. — Ĉu vi povas konjekti? Ĉar mi vidis hieraŭ nokte la signalfajrojn kaj la mesaĝrajdistojn; kaj Gandalfo diris, ke tio estas signo, ke la milito komenciĝis. Li ŝajnis krize hastema. Sed nun ĉio ŝajnas denove malrapidanta.

— Nur pro tio, ke ĉio estas jam preta, — diris Beregondo. — Temas nur pri la profunda enspiro antaŭ la plonĝo.

— Sed kial estis la signalfajroj flamigitaj hieraŭ nokte?

— Tro malfruas alvoki helpon, kiam oni estas jam sieĝata. Sed mi ne konas la planojn de la Mastro kaj ties komandantoj. Ili havas multajn metodojn havigi informojn. Kaj la Mastro Denetoro estas malsimila al aliuloj: li vidas malproksimen. Iuj diras, ke sidante sola en sia alta ĉambro en la Turego nokte kaj turnante tien-reen siajn pensojn, li kapablas iomete antaŭvidi la estontecon; kaj ke li kelkfoje elserĉas eĉ la pensojn de la Malamiko, luktante kontraŭ li. Kaj tiel estas, ke li maljunas, antaŭtempe

kaduka. Sed kiel ajn, estro Faramiro estas ekstere, post la rivero pro iu danĝera komisio, kaj eble li sendis informojn.

» Sed se vi volas scii, kio laŭ mia opinio flamigis la signalfajrojn, tio estis la novaĵo, kiu alvenis hieraŭ vespere el Lebenino. Granda ŝiparo proksimiĝas al la elfluejoj de Anduino, navigata de la korsaroj el Umbaro en la sudo. Tiuj jam delonge ĉesis timi la potencon de Gondoro, kaj ili alianciĝis al la Malamiko, kaj nun plenumas pezan baton liakomisie. Ĉar tiu atako forlogos grandan parton de tiu helpo, kiun ni supozis havi el Lebenino kaj Belfalaso, kie la homoj estas harditaj kaj multnombraj. Tiom pli iras niaj pensoj norden al Rohano; kaj des pli feliĉigas nin tiuj novaĵoj pri venko, kiujn vi alportis.

» Kaj tamen, — li paŭzis, stariĝis kaj ĉirkaŭrigardis norden, orienten kaj suden, — la okazaĵoj ĉe Isengardo devus averti nin, ke ni estas implikitaj nun en grandaj reto kaj strategio. Ne plu estas kverelado ĉe la vadejoj, kaperado el Itilio kaj el Anorieno, embuskado kaj rabado. Tio ĉi estas granda milito longe planita, kaj ni estas nur unu peono en ĝi, kion ajn asertas la fiero. Io moviĝas en la fora oriento aliflanke de la Interna Maro, laŭ la raportoj; norde en Mornarbaro kaj post ĝi; kaj sude en Harado. Kaj nun ĉiuj regnoj estos submetitaj al provado, por stari aŭ fali — sub la Ombro.

» Tamen, mastro Peregrino, ni havas jenan honoron: ĉiam ni ricevas la ĉefan malamon de la Malhela Mastro, ĉar tiu malamo devenas el la profundoj de la tempo kaj trans la profundoj de la maro. Ĉi tie trafos plej forte la martelbato. Kaj pro tio Mitrandiro venis ĉi tien tiel haste. Ĉar se ni falos, kiu staros? Kaj, mastro Peregrino, ĉu vi vidas ian esperon, ke ni staros?

Grinĉjo ne respondis. Li rigardis la muregojn, la turojn kaj bravajn standardojn, kaj la sunon sur la alta ĉielo, kaj poste al la kreskanta malhelo en la oriento; kaj li pensis pri la longaj fingroj de tiu Ombro: pri la orkoj en la arbaroj kaj montaroj, perfidemo de Isengardo, birdoj misokulaj, Nigraj Rajdantoj eĉ en la vojetoj de la Provinco kaj pri la flugilhavaj teruraĵoj — la nazguloj. Li ektremegis, kaj espero ŝajnis velki. Kaj precize tiam la suno momente hezitis kaj estis kaŝita, kvazaŭ ĝin transpasus malhela flugilo. Preskaŭ preteraŭde li supozis, ke li konstatis, alte kaj fore en la ĉielo, krion mallaŭtan, sed korpreman, kruelan kaj malvarman. Li paliĝis kaj kaŭris kontraŭ la muro.

— Kio estis tio? — demandis Beregondo. — Ĉu ankaŭ vi sentis ion?

— Jes, — murmuris Grinĉjo. — Ĝi estas signo pri nia falo, kaj la ombro misfortuna, Kruela Rajdanto de l' aero.

— Jes, la ombro misfortuna, — diris Beregondo. — Mi timas, ke

Minaso Tirit falos. Nokto venas. La varmo de mia sango mem ŝajnas forrabita.

Dum kelka tempo ili sidis kune kun la klinitaj kapoj kaj ne parolis. Subite Grinĉjo rigardis supren kaj vidis, ke la suno plu brilas kaj la standardoj plu flirtas en la venteto. Li skuis sin.

— Ĝi jam pasis, — li diris. — Ne, mia koro rifuzas nun malesperi. Gandalfo falis kaj revenis kaj estas kun ni. Ni eble staros, eĉ se nur per unu kruro, aŭ almenaŭ pluvivos surgenue.

— Prave dirite! — ekkriis Beregondo, leviĝante kaj paŝante tien-reen. — Ne, kvankam ĉio ekzistanta devas finfine tute ĉesi, Gondoro ankoraŭ ne pereos. Eĉ se la murojn kaptos senbrida malamiko, kiu konstruos monton da kadavroj antaŭ si. Troviĝas ankoraŭ aliaj fortikaĵoj kaj sekretaj eskapaj vojoj en la montaron. Espero kaj memoro vivos ankoraŭ en iu kaŝita valo, kie la herbo estas verda.

— Tamen mi preferus, ke ĝi estus finita, ĉu bone, ĉu mise, — diris Grinĉjo. — Mi tute ne estas batalisto kaj malŝatas eĉ pensi pri batalo; sed atendado rande de batalo, kiun mi ne povas eviti, estas plej malbona. Kiel longa ŝajnas jam ĉi tiu tago! Mi estus pli kontenta, se ni ne estus devigataj stari rigardante, neniel moviĝante, nenie batante la unuaj. Laŭ mia opinio, sen Gandalfo neniu bato estus farita en Rohano.

— Ha, tie vi tuŝas la vundon, kiun multaj sentas! — diris Beregondo. — Sed eble ŝanĝiĝos la cirkonstancoj, kiam revenos Faramiro. Li estas aŭdaca, pli aŭdaca, ol taksas multaj; ĉar en la nuna tempo la homoj malvolonte kredas, ke estro povas esti saĝa kaj klera pri la analoj de tradicioj kaj kantoj, kiel li, kaj tamen hardita kaj rapide decidkapabla sur batalkampo. Sed tia estas Faramiro. Malpli impeta kaj senzorga ol Boromiro, sed ne malpli rezoluta. Tamen kion li povos fari? Ni ne povas alsturmi la montojn de... de tiu regno. Nia atingopovo mallongiĝis, kaj ni ne povas bati ĝis iu malamiko venas al ĝia etendiĝo. Tiam nia mano devas esti peza! — Li frapis la tenilon de sia glavo.

Grinĉjo rigardis lin: altan, fieran kaj noblan, kiel ĉiuj viroj, kiujn li ĝis nun vidis en tiu lando, kaj kun ekbrilo en l' okuloj li pensis pri la batalo. "Ve! mia propra mano sentiĝas plume malpeza, — li pensis, sed li diris nenion. — ĉu peono, diris Gandalfo? Eble, sed sur la malĝusta ŝaktabulo".

Tiel ili interparolis, ĝis la suno atingis sian zeniton, kaj subite la tagmeza sonorado aŭdiĝis, kaj en la citadelo estis moviĝo, ĉar ĉiuj krom la sentineloj iris manĝi.

— Ĉu vi volas akompani min?— diris Beregondo. — Vi rajtas aliĝi al mia manĝorondo hodiaŭ. Mi ne scias, al kiu trupo vi estos nomita, aŭ la Mastro eble retenos vin sub la propra komando. Sed vi estos bonvena. Kaj

estos bone, ke vi konatiĝu kun laŭeble multaj homoj, dum ankoraŭ restas tempo.

— Mi venos tre volonte, — diris Grinĉjo. — Mi sentas min soleca, se diri la veron. Mi postlasis mian ĉefamikon en Rohano, kaj mankis al mi iu, kun kiu mi babilu aŭ spritu. Eble mi povus efektive aliĝi al via trupo, ĉu? Ĉu vi estas la trupestro? Se jes, vi povus akcepti min, aŭ subteni mian proponon, ĉu?

— Ne, ne, — Beregondo ridis, — mi neniel estas trupestro. Nek oficon, nek rangon, nek estrecon mi havas, ĉar mi estas nur ordinara soldato en la Tria Trupo de la Citadelo. Tamen, sinjoro Peregrino, esti nur ordinara soldato inter la gardistaro de l' Turego de Gondoro estas alte taksata en la urbo, kaj tiaj homoj estas honorataj en la lando.

— Tiuokaze ĝi estas ekster mia atingo, — diris Grinĉjo. — Rekonduku min al nia ĉambro, kaj se Gandalfo ne estos tie, mi iros kien ajn plaĉos al vi — kiel via gasto.

Gandalfo ne estis en la loĝejo kaj sendis neniun mesaĝon; do Grinĉjo akompanis Beregondon kaj estis prezentita al la viroj de la Tria Trupo. Kaj ŝajnis, ke Beregondo estis tiel honorata kiel lia gasto, ĉar Grinĉjo estis tre bonvena. Jam oni multe klaĉis en la citadelo pri la kunulo de Mitrandiro kaj ties longa kunestado kun la Mastro; kaj onidiro deklaris, ke Princo de la duonuloj venis el la nordo por proponi al Gondoro lojalecon kaj kvin mil glavojn. Kelkaj diris, ke kiam venos la rajdistoj el Rohano, ĉiu el ili kunrajdigos duonulan bataliston, eble malgrandan, tamen bravan.

Kvankam Grinĉjo devis kun bedaŭro detrui tiun esperigan rakonton, li ne povis liberiĝi de sia nova rango, tre taŭga, la homoj pensis, por amiko de Boromiro kaj honorito de la Mastro Denetoro; kaj ili dankis lin pro tio, ke li venis inter ilin, kaj avide aŭskultis liajn dirojn kaj historiojn pri la eksterejoj, kaj donis al li tiom da manĝaĵo kaj biero, kiom li povis deziri. Efektive lia sola problemo estis "singardi" laŭ la konsilo de Gandalfo, kaj ne permesi al sia lango liberan moviĝadon laŭ kutimo de la hobitoj inter amikoj.

Finfine Beregondo stariĝis.

— Adiaŭ provizore! — li diris. — Mi nun deĵoros ĝis la sunsubiro, kiel ĉiuj aliaj ĉi tie, mi opinias. Sed se vi estas soleca, kiel vi diris, eble plaĉus al vi gaja gvidanto tra la urbo. Mia filo tre volonte akompanos vin. Brava knabo, mi rajtas diri. Se tion vi ŝatus, malsupreniru ĝis la plej malalta rondo kaj demandu pri la Malnova Gastejo sur la Rat Celedrajno, la Lampfarista Strato. Tie vi trovos lin kun aliaj junuloj, kiuj restas en la urbo. Eble okazos vidindaĵoj ĉe la Granda Pordego antaŭ ol ĝi estos fermita.

Li eliris kaj baldaŭ sekvis lin la aliaj. La tago estis ankoraŭ bela,

kvankam ĝi nebuletiĝis, kaj estis pli ol kutime varme en marto, eĉ tiom sude. Grinĉjo sentis sin dormema, sed la loĝejo ŝajnis sengaja, kaj li decidis malsupreniri kaj esplori la urbon. Li prenis kelkajn frandaĵojn, kiujn li konservis, al Ombrofakso, kaj tiuj estis ĝentile akceptitaj, kvankam verŝajne al la ĉevalo mankis nenio. Poste li pluiris suben laŭ multaj serpentumaj vojetoj.

La homoj multe gapis lin, kiam li preterpasis. Fronte al li la homoj seriozmiene ĝentilis, salutante lin laŭ la Gondora maniero per klinita kapo kaj manoj ĉebruste; sed post si li aŭdis multajn vokojn, kiam subĉieluloj avertis endomulojn, ke ili venu vidi la Princon de l' Duonuloj, la kunulon de Mitrandiro. Multaj uzis lingvon alian ol la Komunan, sed postnelonge li jam eksciis, kion signifas *Ernil i Pheriannath*, kaj konstatis, ke lia titolo penetris la urbon antaŭ li mem.

Li venis finfine per arkaĵaj stratoj kaj multaj belaj vojetoj kaj pavimoj al la rondo plej malalta kaj plej larĝa, kaj tie oni direktis lin al la Lampfarista Strato, larĝa vojo direkte al la Granda Pordego. Sur ĝi li trovis la malnovan gastejon, grandan konstruaĵon el griza veterumita ŝtono kun du aloj retroetendiĝantaj de la strato, kaj inter ili mallarĝan razenon, post kiu estis la multfenestra domo, kies tutan larĝon frontis pilastrita portiko kaj ŝtupoj al la razeno. Inter la pilastroj ludis knaboj, la nuraj infanoj viditaj de Grinĉjo en Minaso Tirit, kaj li haltis por rigardi ilin. Baldaŭ unu el ili ekvidis lin kaj kun krio transsaltis la herbon kaj venis sur la straton, sekvate de pluraj aliaj. Tie li staris antaŭ Grinĉjo, rigardante lin de l' *kapo ĝis la piedoj*.

— Saluton, — diris la junulo. — De kie vi venis? Vi estas fremdulo en la urbo.

— Tia mi estis, — diris Grinĉjo, — sed oni diras, ke mi fariĝis viro de Gondoro.

— Ne diru! — diris la knabo. — Tiuokaze ni ĉiuj ĉi tie estas viroj. Sed kiom vi aĝas, kaj kiel vi nomiĝas? Mi estas jam dekjara, kaj baldaŭ altos kvin futojn. Mi pli altas ol vi. Sed mia patro, vidu, estas gardisto, unu el la plej altstaturaj. Kio estas via patro?

— Kiun demandon mi respondu unue? Mia patro kulturas la terenon ĉirkaŭ Vitvelo proksime al Tjukboro en la Provinco. Mi aĝas preskaŭ dudek naŭ jarojn, do tiurilate mi superas vin; tamen mi altas nur kvar futojn, kaj tre verŝajne mi ne plu kreskos, krom flanken.

— Ĉu dudek naŭ! — kriis la knabo kaj fajfis. — Vidu, vi estas sufiĉe maljuna! Tiom maljuna, kiom mia onklo Iorlaso. Tamen, — li aldonis espereme, — mi vetas, ke mi povus starigi vin kaposuben aŭ kuŝigi vin surdorsen.

— Eble vi povus, se mi permesus al vi, — diris Grinĉjo ridante. — Kaj

eble mi povus fari same al vi: mi konas kelkajn luktolertojn de mia landeto. Kie, mi sciigu al vi, oni taksas min nekutime granda kaj forta; kaj mi neniam permesis, ke iu ajn starigu min kaposuben. Do se okazus provo, kaj nenio alia utilus, mi eble estus devigita vin mortigi. Ĉar kiam vi estos pli aĝa, vi lernos, ke la homoj ne estas ĉiam tiaj, kiaj ili ŝajnas; kaj kvankam vi eble taksis min malforta fremduleto kaj facila predo, permesu averti vin: tia mi ne estas, mi estas duonulo hardita, kuraĝa kaj malica! — Grinĉjo tiel minace grimacis, ke la knabo retropaŝis unu paŝon, sed tuj li revenis kun pugnigitaj manoj kaj batalardo en la okuloj.

— Ne! — Grinĉjo ridis. — Ankaŭ ne kredu tion, kion fremduloj diras pri si! Batalisto mi ne estas. Sed ĉiuokaze estus pli ĝentile, ke la provokanto diru, kiu li estas.

La knabo rektigis sin fiere:

— Mi estas Bergilo, filo de Beregondo de la gardistaro.

— Tion mi supozis, — diris Grinĉjo, — ĉar vi aspekte similas vian patron. Lin mi konas, kaj li sendis min por vin trovi.

— Do kial vi ne diris tion senprokraste? — diris Bergilo, kaj subite lia mieno esprimis maltrankvilon. — Ne diru al mi, ke li ŝanĝis sian intencon kaj min forsendos kun la junulinoj! Sed ne, la lastaj furgonoj jam foriris.

— Lia mesaĝo estas malpli malagrabla ol tio, se ne tute agrabla, — diris Grinĉjo. — Li diris, ke se vi preferus fari tion ol starigi min kaposuben, vi eble gvidus min tra la urbo dum kelka tempo. Reciproke mi povus iom rakonti al vi pri foraj landoj.

Bergilo manklakis kaj ridis malŝarĝite.

— Ĉio en ordo, — li kriis. — Do venu! Ni estis baldaŭ irontaj al la Pordo por spekti. Ni iros jam nun.

— Kio okazos tie?

— La trupestrojn de la eksterejoj oni atendas sur la Suda Vojo antaŭ la sunsubiro. Venu kun ni, kaj vi vidos.

Bergilo pruviĝis bona kamarado, la plej agrabla societo por Grinĉjo de kiam li disiĝis de Gaja, kaj baldaŭ ili ridis kaj interparolis gaje dum ili trairis la stratojn, senzorgaj pri la multaj rigardoj direktitaj de la homoj al ili. Postnelonge ili trovis sin en homamaso iranta al la Granda Pordego. Tie Grinĉjon multe pli estimis Bergilo, ĉar kiam li diris sian nomon kaj la pasvorton, la gardisto salutis lin kaj lasis lin trapasi; kaj krom tio permesis, ke lin akompanu lia kunulo.

— Tre bone! — diris Bergilo. — Al ni knaboj ne plu estas permesate trapasi la Pordegon sen plenaĝulo. Jam ni vidos pli bone.

Post la Pordego troviĝis homamaso laŭlonge de la vojflanko kaj de la granda pavimita spaco, al kiu direktiĝis ĉiuj vojoj al Minaso Tirit. Ĉies

okuloj estis turnitaj suden, kaj baldaŭ leviĝis murmurado: “Jen polvo en la foro! Ili venas!”

Grinĉjo kaj Bergilo iom post iom progresis ĝis la antaŭo de la homamaso, kaj atendis. Kornoj aŭdiĝis iom malproksime, kaj la bruo de huraoj ruliĝis al ili kvazaŭ plifortiĝanta vento. Poste okazis laŭta trumpetado, kaj ĉie ĉirkaŭ ili la homoj kriadis.

— Forlongo! Forlongo!

— Kion oni diras? — demandis Grinĉjo aŭdinte la homojn voki.

— Forlongo venis, — Bergilo respondis, — maljuna Forlongo la Grasa, la Estro de Losarnaĥo. Tie loĝas mia avo. Hura! Jen li. Brave Forlongo!

Fronte de la spaliro promenis granda dikmembra ĉevalo, sur kiu sidis viro larĝaŝultra kaj ĉirkaŭmezure grandega, sed maljuna kaj grizbarba, tamen kirasita kaj nigrakaska kaj portanta longan pezan lancon. Malantaŭ li fiere marŝis polvokovrita spaliro da bone armitaj viroj, portantaj grandajn batalhakilojn; minacvizaĝaj ili estis, malpli altaj kaj iomete pli brunhaŭtaj ol la homoj, kiujn Grinĉjo ĝis tiam vidis en Gondoro.

— Forlongo! — la homoj kriis. — Verkora, vera amiko! Forlongo! — Sed kiam la viroj el Losarnaĥo jam pasis, ili murmuris: — Tiom malmultaj! Ducent, kiom valoras? Ni esperis pri dekoble tiom. Tio supozeble estas la novaĵo de la nigra ŝiparo. Ili disponigas nur dekonon de sia nombro. Tamen ĉiu ereto estas gajno.

Kaj tiel venis la trupoj kaj estis salutataj kaj huraumataj kaj trapasis la Pordegon, homoj de l’ eksterejoj marŝantaj por defendi la ĉefurbon de Gondoro en malluma horo; sed ĉiam tro malmultaj, ĉiam malpli ol espero atendis aŭ neceso postulis. Tricento da viroj el Valo Ringlo malantaŭ la filo de sia estro Dervorino marŝanta piede. El la altejoj de Morthondo, la granda Nigraradika Valo, alta Duinhiro kun siaj filoj Duilino kaj Derufino kaj kvincent pafarkistoj. El Enfalaso, la fora Longstrando, longa spaliro da viroj multspecaj, ĉasistoj kaj paŝtistoj kaj vilaĝanoj, malabunde ekipitaj krom la domanaro de ilia estro Golasgilo. El Lamedono, kelkaj severaj montaranoj sen komandanto. Fiŝkaptistoj de Etiro, cento aŭ pli liberigitaj de la ŝipoj. Hirluino la Bela de la Verdaj Montoj el Pinato Gelin kun tri centoj da bravaj verdevestitaj viroj. Kaj laste kaj plej fiere, Imrahilo, princo de Dol Amroto, parenco de Denetoro, kun orumitaj standardoj surhavantaj lian markon de la Ŝipo kaj la Arĝenta Cigno, kaj trupo de kavaliroj en plena kirasaĵo rajdantaj grizajn ĉevalojn; kaj malantaŭ ili sepcent armitoj, altaj kiel princoj, grizokulaj, malhelharaj, kiuj kantis venante.

Kaj jen ĉio, malpli ol tri mil sume. Venos neniom pli. Iliaj krioj kaj la batado de iliaj piedoj pasis en la urbon kaj forvelkis. La spektintoj staris kelkan tempon silentaj. Polvo ŝvebis en la aero, ĉar la vento formortis kaj la

vespero estis pezaera. Jam proksimiĝis la fermohoro, kaj la ruĝa suno jam estis malantaŭ Mindoluino. Ombreco ekkovris la urbon.

Grinĉjo suprenrigardis, kaj ŝajnis al li, ke la ĉielo iĝis cindrogriza, kvazaŭ vasta polvaĵo kaj fumo pendus super ili, kaj la lumo nur sordinite trapasis tion. Sed okcidente la mortanta suno ekflamigis la tutan fumaĵon, kaj nun Mindoluino staris nigra antaŭ brula ardo trastrekita je cindraĵo.

— Tiel finiĝas bela tago per kolero! — Grinĉjo diris, forgesinte pri la knabo ĉe sia flanko.

— Tiel ja estos, se ni ne reiros antaŭ la sunsubira sonorado, — diris Bergilo. — Ek! Jam sonas la trumpeto por fermi la Pordegon.

Manenmane ili reiris la urbon, la lastaj trapasintoj antaŭ ol estis fermita la Pordego; kaj kiam ili atingis la Lampfaristan Straton, ĉiuj sonoriloj en la turoj sonoris solene. Lumoj ekaperis en multaj fenestroj, kaj el la domoj kaj gardejoj de la armitoj laŭlonge de la muroj aŭdiĝis kantado.

— Ĝis revido provizore, — diris Bergilo. — Salutu mianome mian patron, kaj danku lin pro la societo, kiun li sendis. Revenu baldaŭ, mi petegas. Preskaŭ mi nun volas, ke milito ne estu, ĉar ni eble dividus multe da plezuro. Ni eble vojaĝus al Losarnaĥo, al la domo de mia avo; estas agrable tie en printempo, la arbaroj kaj kampoj plenas je floroj. Sed eble ni iros kune tien en iamo. Ili neniam venkos nian Mastron, kaj mia patro estas tre kuraĝa. Ĝis revido kaj revenu!

Ili disiĝis, kaj Grinĉjo rapidis reen al la citadelo. La vojo ŝajnis longa, kaj li tre varmiĝis kaj malsatiĝis; kaj la nokto inundis rapida kaj malluma. Neniu stelo trapikis la ĉielon. Li malfruis al vespermanĝo en la manĝejo, kaj Beregondo salutis lin ĝoje, kaj sidigis lin apude por aŭdi novaĵon pri sia filo. Post la vespermanĝo Grinĉjo iom restadis, kaj poste adiaŭis, ĉar lin okupis stranga morneco, kaj li jam tre deziris revidi Gandalfon.

— Ĉu vi trovos la vojon? — diris Beregondo ĉe la pordo de la haleto, nordflanke de la citadelo, en kiu ili sidis. — Nigras la nokto, kaj ĉiam pli nigre, de kiam venis la ordono, ke la lumoj estu malfortigitaj en la urbo, kaj neniu disradiu de la muroj. Kaj mi povas sciigi vin pri alia ordono: oni alvokos vin al la Mastro Denetoro frue morgaŭ. Mi timas, ke vi ne estas destinita por la Tria Trupo. Tamen mi rajtas esperi pri rerenkontiĝo. Ĝis la, kaj dormu pace!

La loĝejo estis senluma, krom lampeto starigita sur la tablo. Gandalfo ne estis tie. Melankolio pli profunde okupis Grinĉjon. Li grimpis sur la benkon kaj provis elrigardi tra fenestro, sed tio estis kvazaŭ enrigardi lageton da inko. Li degrimpis, fermis la fenestrokovrilon kaj enlitiĝis. Dum kelka tempo li kuŝis atendante sonojn de reveno de Gandalfo, kaj poste li maltrankvile ekdormis.

Nokte lin vekis iu lumo, kaj li vidis, ke Gandalfo venis kaj paŝadas tien-reen en la ĉambro malantaŭ la alkova kurteno. Sur la tablo estis kandeloj kaj pergamenaj rulaĵoj. Li aŭdis la sorĉiston suspiri kaj murmuri:

— Kiam revenos Faramiro?

— Saluton! — diris Grinĉjo, elŝovante sian kapon ĉirkaŭ la kurtenon. — Mi pensis, ke vi tute forgesis pri mi. Mi ĝojas vidi vin reveninta. La tago estis longa.

— Sed la nokto estos tro mallonga, — diris Gandalfo. — Mi revenis ĉi tien, ĉar mi urĝe bezonas iom da trankvilo en soleco. Vi devus dormi en lito, dum tio ankoraŭ eblas. Je sunleviĝo mi kondukos vin denove al la Mastro Denetoro. Ne, kiam venos la alvoko, ne je sunleviĝo. La malhelo komenciĝis. Aŭroro ne estos.

2

La forpaso de la Griza trupo

Gandalfo jam foriris, kaj la batantaj hufoj de Ombrofakso perdiĝis en la nokto, kiam Gaja revenis al Aragorno. Li portis nur malpezan pakon, ĉar sian tornistron li perdis ĉe Part Galeno, kaj lia tuta havaĵo estis kelkaj utilaĵoj, kiujn li prenis en la ruinaĵo de Isengardo. Hasufelo estis jam selita. Legolaso kaj Gimlio kun sia ĉevalo staris proksime.

— Do restas ankoraŭ kvar el la Kunularo, — diris Aragorno. — Ni plu rajdos kune. Sed ni ne iros solaj, kiel mi supozis. La reĝo jam firme decidis tuj ekiri. Post la veno de l' flugilhava ombro li deziras reiri al la montetoj kaŝite de la nokto.

— Kaj poste kien? — diris Legolaso.

— Mi ankoraŭ ne scias, — Aragorno respondis. — Koncerne la reĝon, li iros al la armea apelo, kiun li ordonis en Edoraso, kvar noktojn de nun. Kaj tie, mi pensas, li aŭdos novaĵon pri milito, kaj la rajdistoj de Rohano iros al Minaso Tirit. Krom mi kaj tiuj, kiuj akompanos min.

— Inter ili mi! — kriis Legolaso.

— Kaj kun li Gimlio! — diris la gnomo.

— Nu, koncerne min, — diris Aragorno, — antaŭ mi estas mallume. Ankaŭ mi devos iri al Minaso Tirit, tamen mi ne vidas ankoraŭ la vojon. Horo delonge preparita proksimiĝas.

— Ne lasu min malantaŭe! — diris Gaja. — Mi ĝis nun ne multe utilis; sed mi ne volas flankenmetiĝi, kvazaŭ pakaĵo reprenota, kiam ĉio estos finita. Al mi ŝajnas, ke la rajdistoj jam ne deziros ĝeniĝi pri mi. Kvankam, kompreneble, la reĝo ja diris, ke mi sidiĝu apud li, kiam li alvenos sian domon kaj rakontadu al li pri la Provinco.

— Jes, — diris Aragorno, — kaj mi opinias, ke via vojo troviĝas kun li, Gaja. Sed ne atendu gajecon en la fino. Estos tre longe, mi timas, antaŭ ol Teodeno denove sidos komforte en Meduseldo. Multaj esperoj velkos en tiu ĉi amara printempo.

Baldaŭ ĉiuj estis pretaj foriri: dudek kvar ĉevaloj, kun Gimlio post Legolaso, kaj Gaja antaŭ Aragorno. Postnelonge ili rajdis rapidege tra la nokto. Ili ne longe pasis la teramasojn ĉe la Travadejoj de Iseno, Mam rajdisto algalopis de la malantaŭo de la spaliro.

— Mia mastro, — li diris al la reĝo, — malantaŭ ni estas rajdistoj. Trairante la travadejojn mi pensis aŭdi ilin. Nun ni estas certaj. Ili ekatingas

nin, rajdante senindulge.

Teodeno tuj ordonis halti. La rajdistoj turnis sin kaj kaptis siajn lancojn. Aragorno elseliĝis kaj metis Gajan sur la teron, kaj elingiginte sian glavon stariĝis apud la piedingo de l' reĝo. Eomero kaj ties eskviro rajdis al la malantaŭo. Gaja pli ol antaŭe sentis sin nebezonata pakaĵo, kaj li scivolis, kion li faru, se okazos batalo. Se la malmulta reĝa sekvantaro estus embuskita kaj venkita, kaj nur li eskapus en la mallumon, sola en la sovaĝaj kampoj de Rohano, sen koncepto pri kie li estus en la tuta senlimaĵo? "Ne taŭgas!" — li pensis. Li elingigis sian glavon kaj striktigis sian zonon.

La subirantan lunon kovris granda velanta nubo, sed subite ĝi senkovriĝis denove. Tiam ĉiuj aŭdis bruon de hufoj, kaj sammomente ili vidis malhelajn figurojn rapide venantajn sur la pado de l' travadejoj. La lunlumo ekbrilis ie-tie sur la pintoj de lancoj. La nombro da persekutantoj ne estis kalkulebla, sed tiuj ŝajnis ne malpli ol la reĝa eskortantaro, minimume.

Kiam ili malproksimis ĉirkaŭ kvindek paŝojn, Eomero kriis laŭtvoĉe:

— Haltu! Haltu! Kiu rajdas en Rohano?

La persekutantoj abrupte haltigis siajn ĉevalojn. Sekvis silento; kaj poste en la lunlumo oni vidis rajdiston elseliĝi kaj marŝi malrapide antaŭen. Lia mano vidiĝis blanka, kiam li levis ĝin polmantaŭe, en signo de paco; sed la soldatoj de la reĝo kroĉis siajn armilojn. Dek paŝojn for la homo haltis. Li estis altstatura, staranta ombro malhela. Poste sonis sonore lia klara voĉo.

— Ĉu Rohano? Ĉu Rohanon vi diris? Tio estas vorto ĝojiga. Ni serĉas haste tiun landon de malproksime.

— Vi trovis ĝin, — diris Eomero. — Transirinte tiujn travadejojn vi eniris ĝin. Sed ĝi estas regno de la reĝo Teodeno. Neniu rajdas ĉi tie sen lia permeso. Kiu vi estas? Kaj pro kio via hasto?

— Dunadano Halberado, disirulo de l' nordo mi estas, — kriis la homo. — Ni serĉas Aragornon, filon de Aratorno, kaj ni aŭdis, ke li estas en Rohano.

— Kaj ankaŭ lin vi trovis! — kriis Aragorno. Transdoninte sian kondukrimenon al Gaja, li kuris antaŭen kaj brakumis la ĵusveninton. — Halberado! El ĉiuj ĝojoj, tiu ĉi estas plej neatendita!

Gaja suspiris malstreĉiĝe. Li ja pensis, ke jen iu lasta trompo de Sarumano, embuski la reĝon, dum tiu havis nur malmultajn homojn; sed ŝajnis, ke ne necesos morti defendante Teodenon, almenaŭ ne tuj. Li eningigis sian glavon.

— Ĉio en ordo, — diris Aragorno, returnante sin. — Jen kelkaj el miaj parencoj el la fora lando, kie mi loĝis. Sed kial ili venis, kaj kiom ili estas, Halberado sciigos al ni.

— Kun mi estas trideko, — diris Halberado. — Tio estas ĉiuj niaj parencoj, kiujn oni povis rapide kunigi; sed la fratoj Eladano kaj Elrohiro rajdis kun ni, dezirante militiri. Ni rajdis laŭeble plej haste, kiam venis via alvoko.

— Sed mi ne alvokis vin, — diris Aragorno, — krom nur en la menso. Miaj pensoj ofte turniĝis al vi, kaj malofte pli ol hodiaŭ vespere; tamen neniun vorton mi sendis. Sed venu! Ĉiuj aferoj tiaj devas prokrastiĝi. Vi trovas nin rajdantaj en hasto kaj danĝero. Rajdu nun kun ni, se la reĝo donos permeson.

Teodeno efektive ĝojis pri la novaĵo.

— Estas bone! — li diris. — Se jenaj parencoj entute similas vin, princo Aragorno, tridek tiaj kavaliroj estos forto ne kalkulebla laŭ la kapoj.

Poste la rajdistoj ekiris denove, kaj Aragorno dum kelka tempo rajdis kun la dunadanoj; kaj post kiam ili priparolis novaĵojn en la nordo kaj en la sudo, Elrohiro diris al li:

— Mi kunportis al vi diraĵon de mia patro: *La tagoj mallongas. Se vi hastas, memoru la Padojn de l' Mortintoj*.

— Ĉiam miaj tagoj ŝajnis al mi tro mallongaj por plenumi mian deziron, — respondis Aragorno. — Sed efektive rapida estos mia hasto, antaŭ ol mi tiun vojon iros.

— Tio baldaŭ vidiĝos, — diris Elrohiro. — Sed ni ne plu priparolu tiajn aferojn sur la senŝirma vojo!

Kaj Aragorno diris al Halberado:

— Kion vi portas, parenco? — Ĉar li vidis, ke tiu portas anstataŭ lancon altan bastonon, kvazaŭ ĝi estus standardo, sed ĝi estis strikte volvita en nigra tuko ĉirkaŭligita per multaj ŝnuretoj.

— Ĝi estas donaco, kiun mi portas al vi de la Damo de Rivendelo, — respondis Halberado. — ŝi verkis ĝin sekrete, kaj longa estis la farado. Sed ŝi sendas ankaŭ mesaĝon al vi: *Jam mallongas la tagoj. Venas aŭ nia espero, aŭ la fino de ĉia espero. Tial mi sendas al vi tion, kion mi faris por vi. Fartu bone, Elfŝtono*!

Kaj Aragorno diris:

— Jam mi scias, kion vi portas. Portu ĝin plu por mi dum kelka tempo! — Kaj li fortumis sin kaj foren rigardis al la nordo sub la grandaj steloj, kaj poste li silentiĝis kaj ne plu parolis dum la tuta nokta vojaĝo.

La nokto estis malnova kaj grizis la oriento, kiam ili finfine rajdis supren el la Profunda Kavaĵo kaj revenis al Kornburgo por kuŝi, iomete ripozi kaj interkonsiliĝi.

Gaja dormis ĝis lin vekis Legolaso kaj Gimlio.

— La suno estas alta, — diris Legolaso. — Ĉiuj aliaj jam aktivas. Venu,

sinjoro Pigrulo, rigardi ĉi tiun lokon dum tio eblas!

— Ĉi tie estis batalo antaŭ tri noktoj, — diris Gimlio, — kaj ĉi tie Legolaso kaj mi ludis ludon, en kiu mi gajnis per ununura orko. Venu vidi, kiel estis! Kaj estas kavernoj, Gaja, kavernoj da mirindaĵoj! ĉu ni vizitos ilin, Legolaso, laŭ via supozo?

— Ne! Mankas tempo, — diris la elfo. — Ne fuŝu la miron pro rapidemo! Mi promesis al vi, ke mi revenos ĉi tien kun vi, se revenos tago de paco kaj libereco. Sed nun proksimas al la tagmezo, kaj tiuhore ni manĝos, kaj poste ekvojaĝos denove, mi aŭdis.

Gaja stariĝis kaj oscedis. Lia kelkhora dormo tute ne sufiĉis; li estis laca kaj iom deprimita. Mankis al li Grinĉjo, kaj li sentis sin nura ŝarĝo, dum ĉiuj planadis por rapideco en afero, kiun li ne plene komprenis.

— Kie estas Aragorno? — li demandis.

— En la alta ĉambro de la Burgo, — diris Legolaso. — Li nek ripozis, nek dormis, laŭ mia opinio. Li iris tien antaŭ kelkaj horoj, dirante ke li devas iom mediti, kaj nur lia parenco Halberado akompanis lin; sed ia malhela dubo aŭ zorgo okupas lin.

— Ili estas stranga trupo, tiuj novvenintoj, — diris Gimlio. — Fortuloj nobelaj ili estas, kaj la rajdistoj de Rohano apud ili aspektas preskaŭ knabecaj; ĉar ili estas vizaĝe severaj, plejparte glataj kiel veterumitaj rokoj, samkiel Aragorno mem; kaj ili silentas.

— Sed samkiel Aragorno ili estas ĝentilaj, se ili ĉesas silenti, — diris Legolaso. — Kaj ĉu vi notis la fratojn Eladano kaj Elrohiro?

Malpli sombra estas ilia ekipaĵo ol ĉe la aliaj, kaj ili estas belaj kaj bravaj kiel elfaj princoj; kaj tio ne estas miriga en la filoj de Elrondo de Rivendelo.

— Kial ili venis? Ĉu vi aŭdis? — demandis Gaja. Li estis jam vestita kaj surŝultrigis sian grizan mantelon; kaj la triopo kune eliris al la ruinigita pordo de la Burgo.

— Ili respondis alvokon, kiel vi aŭdis, — diris Gimlio. — Mesaĝo venis al Rivendelo, ili diras: *Aragorno bezonas siajn parencojn. La dunadanoj rajdu al li en Rohanon*! Sed de kie venis tiu mesaĝo ili nun pridubas. Gandalfo sendis ĝin, mi konjektas.

— Ne, Galadriela, — diris Legolaso. — Ĉu ŝi ne parolis per Gandalfo pri la rajdado de la griza trupo el la nordo?

— Jes, vi trafas, — diris Gimlio. — La Damo de l' Arbaro! ŝi legis multajn korojn kaj dezirojn. Nu, kial ni ne vokis mense iujn el niaj propraj parencaroj, Legolaso?

Legolaso staris antaŭ la pordo kaj turnis siajn helajn okulojn for norden kaj orienten, kaj lia bela vizaĝo esprimis ĝenon.

— Ne ŝajnas al mi, ke iuj venus, — li respondis. — Ne necesas al ili alrajdi militon; milito jam marŝas en ilia propra tereno.

Dum kelka tempo la tri kunuloj promenis kune, parolante pri tiu kaj alia elturniĝo de la batalo, kaj ili malsupreniris de la rompita pordo, kaj preterpasis la teramasojn de la falintoj sur la verdejo apud la vojo, ĝis ili staris sur la Ŝtonmuro de Helmo kaj enrigardis la Kavaĵon. La Morta Monteto jam staris tie, nigra kaj alta kaj ŝtonoza, kaj la vasta piedpremado kaj grategado de la herbo far la huornoj estis klare videblaj. La dunlandanoj kaj multaj viroj el la garnizono de la Burgo prilaboris la Ŝtonmuron, sur la kampoj kaj ĉirkaŭ la frakasitaj muroj malantaŭe; tamen ĉio ŝajnis strange silenta: laca valo ripozanta post granda ŝtormo. Baldaŭ ili returniĝis kaj iris al la tagmeza manĝo en la halego de la Burgo.

La reĝo estis jam tie, kaj tuj kiam ili eniris li alvokis Gajan kaj ordonis, ke seĝo estu metita por li ĉe sia flanko.

— Ne estas tiel, kiel mi dezirus, — diris Teodeno, — ĉar tio ĉi malmulte similas mian belan domon en Edoraso. Kaj foriris via amiko, kiu ankaŭ devus esti ĉi tie. Sed eble estos longe, antaŭ ol ni sidos, vi kaj mi, ĉe la alta tablo en Meduseldo; mankos tempo por festado kiam mi revenos tien. Sed ek jam! Manĝu kaj trinku, kaj ni interparolu dum ni havas okazon. Kaj poste vi rajdos kun mi.

— Ĉu vere? — diris Gaja, surprizite kaj ĝojigite. — Tio estos belega! — Li neniam estis pli dankema pro vorta afableco. — Mi timas, ke mi estas nur obstaklo por ĉiuj, — li balbutis, — sed al mi plaĉus fari ion ajn, kion mi povas, sciu.

— Tion mi ne dubas, — diris la reĝo. — Mi ordonis pretigi por vi bravan montetponeon. Ĝi portos vin tiel rapide, kiel ĉevalo sur la vojoj, kiujn ni sekvos. Ĉar mi forrajdos de la Burgo laŭ montaj padoj, ne sur la ebenaĵo, kaj tiel venos al Edoraso tra Dunharo, kie atendas min Damo Eovina. Vi estos mia eskviro, se vi volas. Ĉu troviĝas en tiu ĉi loko armilaro, kiun povus uzi mia glavportulo, Eomero?

— Ne estas ĉi tie grandaj armilaj stokoj, reĝo, — respondis Eomero. — Eble troveblos por li malpeza kasko, kiu konvenos al li; sed ni ne havas maŝkirason nek glavon por iu liastatura.

— Glavon mi havas, — diris Gaja, degrimpante de sia seĝo kaj elingigante sian brilan klingeton el ties nigra ingo. Subite plenigite de amo al tiu ĉi maljunulo, li apogis sin sur unu genuo, kaptis lian manon kaj ĝin kisis. — Ĉu mi rajtas kuŝigi la glavon de Gajadoko de l' Provinco sur vian sinon, reĝo Teodeno? Akceptu mian servon, se vi volas!

— Ĝoje mi akceptas ĝin, — diris la reĝo, kaj metinte siajn longajn maljunajn manojn sur la harojn de la hobito, li benis lin. — Leviĝu nun,

Gajadoko, eskviro de Rohano en la domanaro de Meduseldo! Prenu vian glavon kaj portu ĝin al bona sorto.

— Vi estos al mi kvazaŭ patro, — diris Gaja.

— Dum kelka tempo, — diris Teodeno.

Tiam ili interparolis dum la manĝado, ĝis baldaŭ parolis Eomero.

— Proksimiĝas la horo, kiun ni nomis por nia foriro, reĝo, — li diris. — Ĉu mi ordonu ke oni blovu la trampetojn? Sed kie estas Aragorno? Lia loko malplenas, kaj li ja ne manĝis.

— Ni pretiĝos por rajdado, — diris Teodeno, — sed oni sendu informon aua princo Aragorno, ke la horo estas proksima.

La reĝo kun sia gardistaro kaj Gaja apude pasis suben de la burga pordo ĝis kie la rajdistoj kunvenis sur la razeno. Multaj estis jam surĉevalaj. Tio estis granda trupo, ĉar la reĝo postlasos nur malgrandan garnizonon en la Burgo, kaj ĉiuj allaseblaj rajdos al la apelo en Edoraso. Jam mil lancistoj forrajdis nokte; sed ankoraŭ estos ĉirkaŭ kvincent por akompani la reĝon, plejparte viroj el la kampoj kaj valoj de Ŭestfaldo. Iom aparte sidis la disiruloj, silentaj, en orda societo, armitaj je lancoj, pafarkoj kaj glavoj. Ili estis vestitaj en manteloj malhele grizaj, kaj iliaj kapuĉoj estis nun kovrantaj la kaskon kaj kapon. Iliaj ĉevaloj estis fortaj kaj fieraj, sed malglatharaj; kaj unu staris sen rajdanto, la propra ĉevalo de Aragorno, kiun ili aligis el la nordo; Roherino estis ties nomo. Estis neniu ekbrilo de gemo aŭ oro, nek omamaĵo sur ilia tuta armilaro kaj kirasaro, kiel la rajdistoj portis neniun insignon aŭ blazonon, krom nur ke ĉiu mantelo estis pinglita ĉe la maldekstra ŝultro per broĉo arĝenta en la formo de disradia stelo.

La reĝo suriĝis sian ĉevalon Neĝkolaĵo, kaj Gaja sidis apud li sur sia poneo, kiu nomiĝis Stibo. Baldaŭ Eomero elvenis tra la pordo, kaj kun li estis Aragorno kaj Halberado portanta la grandan bastonon nigre volvitan, kaj du altaj viroj, nek junaj nek maljunaj. La filoj de Elrondo tiom similis, ke malmultaj kapablis disdistingi ilin: malhelharaj, grizokulaj, kun vizaĝoj elfe palaj, vestitaj samece en hela maŝaĵo sur manteloj arĝentgrizaj. Malantaŭ ili marŝis Legolaso kaj Gimlio. Sed Gaja rigardis nur Aragornon, tiom konsterna estis la ŝanĝiĝo, kiun li vidis en tiu, kvazaŭ dum unu nokto multaj jaroj falus sur lian kapon. Severega estis lia vizaĝo, grizkolora kaj lacega.

— Mia menso estas zorgoplena, mastro, — li diris, starante apud la ĉevalo de l' reĝo. — Mi aŭdis strangajn vortojn, kaj mi vidas novajn danĝerojn en la foro. Mi longe peze pensadis, kaj nun mi timas, ke mi devas ŝanĝi mian celon. Diru, Teodeno, nun vi rajdos al Dunharo, kiom longe ĝis vi alvenos tien?

— Estas jam plena horo post la tagmezo, — diris Eomero. — Antaŭ la

nokto de la tria tago ekde nun ni devos alveni la Fortikaĵon. La luno estos tiam unu nokton post la pleno, kaj la kunveno, kiun la reĝo ordonis, okazos en la posta tago. Pli rapide ni ne povos fari, se la forto de Rohano estu kunigita.

Aragorno silentis momente.

— Tri tagojn, — li murmuris, — kaj la kunveno de Rohano estos nur komencita. Sed mi konstatas, ke jam ne eblas tion hastigi. — Li rigardis supren, kaj ŝajne li ion pridecidis; lia vizaĝo estis malpli zorgoplena. — Do, kun via permeso, reĝo, mi devos sekvi novan konsilon por mi kaj mia parencaro. Ni devos rajdi laŭ propra vojo, kaj ne plu kaŝe. Por mi la tempo de sekreteco jam forpasis. Mi rajdos orienten laŭ la plej rapida vojo, kaj mi iros la Padojn de l' Mortintoj.

— Ĉu la Padojn de l' Mortintoj! — diris Teodeno kaj tremis.

— Kial vi parolas pri tiuj? — Eomero turnis sin kaj rigardadis Aragornon, kaj ŝajnis al Gaja, ke la vizaĝoj de la rajdistoj, kiuj sidis en aŭdodistanco, paliĝis.

— Se tiaj padoj veras, — diris Teodeno, — ties enirejo troviĝas en Dunharo; sed neniu vivanto rajtas trapasi ĝin.

— Ve! Aragorno, amiko mia! — diris Eomero. — Mi esperis, ke ni militiros kune; sed se vi celas la Padojn de l' Mortintoj, nia disiĝo sekve okazas, kaj tre neverŝajne estas, ke ni iam renkontiĝos denove sub la suno.

— Tamen tiun vojon mi iros, — diris Aragorno. — Sed mi diras al vi, Eomero, ke en batalo ni eble denove renkontiĝos, eĉ se ĉiuj amasoj de Mordoro staros inter ni.

— Vi faros laŭ via volo, mastro Aragorno, — diris Teodeno. — Estas via sorto, eble, paŝi strangajn vojojn, kiujn aliaj ne aŭdacas. Tiu ĉi disiĝo dolorigas min, kaj pro ĝi mia forto malpliiĝas; sed nun mi devas iri laŭ la montetaj vojoj kaj ne plu prokrasti. Adiaŭ!

— Adiaŭ, mastro! — diris Aragorno. — Rajdu al granda famo! Adiaŭ, Gaja! Mi lasas vin en bonaj manoj, pli bonaj ol ni esperis, kiam ni ĉasis la orkojn al Fangorno. Legolaso kaj Gimlio plu ĉasos kun mi, mi esperas; sed ni ne forgesos vin.

— Adiaŭ! — diris Gaja. Nenion pli li trovis por diri. Li sentis sin tre malgranda, kaj lin embarasis kaj deprimis ĉiuj tiuj mornaj vortoj. Pli ol antaŭe mankis al li la neestingebla gajeco de Grinĉjo. La rajdistoj estis pretaj, kaj ties ĉevaloj nervoze movetiĝis; li volis, ke ili ekiru kaj metu punkton al la afero.

Nun Teodeno parolis al Eomero, kaj tiu levis sian manon kaj kriegis, kaj pro tiu signalo la rajdistoj ekiris. Ili rajdis trans la Ŝtonmuron kaj suben laŭ la Kavaĵo, kaj poste, turninte sin rapide orienten, ili sekvis padon, kiu laŭiris

la montosubon tra proksimume unu mejlo, ĝis kurbiĝinte suden ĝi retropasis inter la montetoj kaj malaperis el la vidkampo. Aragorno rajdis ĝis la Ŝtonmuro kaj rigardis ĝis la reĝaj soldatoj tre foris sur la Kavaĵo. Tiam li turnis sin al Halberado.

— Jen iras tri, kiujn mi amas, kaj ne malplej la plej etan, — li diris. — Li ne scias, al kiu celo li rajdas; tamen se li tion scius, li same pluirus.

— Popolo malgranda, sed ege valora, estas la provincanoj, — diris Halberado. — Malmulton ili scias pri nia longa laboro por gardi iliajn landlimojn, tamen tion mi ne domaĝas.

— Kaj nun niaj sortoj estas kunteksitaj, — diris Aragorno. — Tamen, ve! ĉi tie ni devas disiĝi. Nu, mi devas manĝi iomete, kaj poste ankaŭ ni devos forrapidi. Venu, Legolaso kaj Gimlio! Mi devas interparoli kun vi, dum mi manĝas.

Kune ili reiris al la Burgo; tamen dum kelka tempo Aragorno sidis silente ĉe la tablo en la halego, kaj la aliaj atendis lian ekparolon.

— Vidu, — diris Legolaso fine. — Parolu kaj konsoliĝu, kaj forskuu la ombron! Kio okazis, post kiam ni revenis al tiu ĉi malagrabla loko en la griza mateno?

— Lukto iom pli serioza miaopinie ol la batalo de Kornburgo, — respondis Aragorno. — Mi enrigardis la Ŝtonon de Ortanko, miaj amikoj.

— Ĉu vi enrigardis tiun malbenitan ŝtonon sorĉistan! — ekkriis Gimlio kun timo kaj surprizego survizaĝe. — Ĉu ion vi diris al... li? Eĉ Gandalfo timis tiun renkontiĝon.

— Vi forgesis, al kiu vi parolas, — diris Aragorno admone, kaj liaj okuloj ekbriletis. — Ĉu mi ne deklaris publike mian titolon antaŭ la pordego de Edoraso? Kion, laŭ via timo, mi dirus al li? Ne, Gimlio, — li diris per voĉo malpli laŭta, kaj la severo lasis lian vizaĝon, kaj li aspektis kiel iu, kiu penis dum multaj noktoj en sendorma doloro. — Ne, amikoj miaj, mi estas la laŭleĝa mastro de la Ŝtono, kaj mi havis tiel la rajton kiel la forton uzi ĝin, aŭ tiel mi juĝis. Pri la rajto ne povas esti dubo. La forto sufiĉis, sentroe.

Li enspiris profunde.

— Tio estis senkompata lukto, kaj la laco malrapide pasas. Neniun vorton mi diris al li, kaj en la fino mi ŝiris la ŝtonon al mia propra volo. Eĉ tion solan li malfacile toleros. Kaj li ekvidis min. Jes, mastro Gimlio, li ekvidis min, sed en formo alia, ol vi vidas min ĉi tie. Se tio helpos lin, mi agis mise. Sed tion mi ne opinias. Scii, ke mi vivas kaj promenas sur la tero, estis bato al lia koro, laŭ mia takso, ĉar tion li ĝis nun ne sciis. La okuloj en Ortanko ne vidis min tra la armaĵo de Teodeno, sed Saŭrono ne forgesis Isilduron kaj la glavon de Elendilo. Nun en la horo mem de liaj grandaj

projektoj la heredinto de Isilduro kaj la Glavo estas rivelitaj; ĉar mi montris al li la klingon reforĝitan. Li ankoraŭ ne tiom potencas, ke li ne spertas timon; ne, dubo ĉiam mordetas lin.

— Sed li vaste dominas, malgraŭ ĉio, — diris Gimlio, — kaj jam li frapos pli rapide.

— Hasta frapo ofte mistrafas, — diris Aragorno. — Ni devas premadi nian Malamikon, kaj ne plu atendi, ke li iniciatu la movon. Vidu, miaj amikoj, ekmastrinte la Ŝtonon mi lernis multajn aferojn. Gravan minacon mi vidis venanta tute neatendite al Gondoro el la sudo, kiu forlogos grandan forton de la defendado de Minaso Tirit. Se ĝi ne estos rapide kontraŭstarita, mi taksas, ke la urbo estos perdita antaŭ ol pasos dek tagoj.

— Do perdita ĝi devos esti, — diris Gimlio. — Ĉar kiun helpon oni povas sendi tien, kaj kiel ĝi povus alveni ĝustatempe?

— Mi ne havas helpon sendeblan, tial mi devos mem iri, — diris Aragorno. — Sed ekzistas nur unu vojo tra la montaro, kiu venigos min al la marborda regiono antaŭ ol perdiĝos ĉio. Tiu estas la Padoj de l' Mortintoj.

— La Padoj de l' Mortintoj! — diris Gimlio. — Tio estas nomo misfortuna, kaj ĝi malmulte plaĉas al la rohananoj, kiel mi rimarkis. Ĉu vivantoj povas uzi tiun vojon senperee? Kaj eĉ se vi pasos per tiu vojo, kiom valoros tiel malmultaj por kontraŭi la batojn de Mordoro?

— Vivantoj ne uzis tiun vojon depost la alveno de la rohananoj, — diris Aragorno, — ĉar ĝi estas fermita kontraŭ ili. Sed en tiu ĉi malluma horo la heredanto de Isilduro rajtas uzi ĝin, se li aŭdacas. Aŭskultu! Jen estas la vortoj, alportitaj al mi de la filoj de Elrondo, de ilia patro en Rivendelo, la plej saĝa pri analoj: *Diru, ke Aragorno memoru la vortojn de la profeto kaj la Padojn de l' Mortintoj*.

— Kaj kiuj estas la vortoj de la profeto? — diris Legolaso.

— Tiel parolis Malbeto la Profeto, dum la tagoj de Arveduo, la lasta reĝo de Fornosto, — diris Aragorno:

Kuŝas tra l' lando ombro longa,
ŝovas mallumon okcidenten.
Tremas Turego; al tomboj reĝaj
iras la sort'. Mortintoj vekiĝas:
venis la horo de l' ĵurrompintoj:
ili staros denove ĉe l' Ŝton' de Ereĥo
kaj aŭdos tie kornon surmontan.
Kies la korno? Kiu ilin vokos
el griza krepusko, la forgesitojn?
La heredanto de l' alĵurito.
Li venos el nordo, necespelate:

li pasos la Pordon de l’ Padoj Mortintaj.

— Vojoj mallumaj, sendube, — diris Gimlio, — sed ne pli mallumaj ol estas tiuj versoj al mi.

— Se vi volas kompreni ilin pli bone, tiam mi petas, ke vi akompanu min, ĉar tiun vojon mi nun iros. Sed mi faras tion senĝoje; pelas min nur la neceso. Sekve nur laŭ via libera volo mi deziras, ke vi venu, ĉar vi trovos tiel laboron kiel timegon, kaj eble ion pli malbonan.

— Mi akompanos vin eĉ sur la Padoj de l’ Mortintoj, kaj al kiu ajn celo ili kondukos, — diris Gimlio.

— Ankaŭ mi venos, — diris Legolaso, — ĉar la mortintojn mi ne timas.

— Mi esperas, ke la forgesitoj ne jam forgesis, kiel oni batalas, — diris Gimlio, — ĉar sen tio mi ne scias, kial ni ĝenu ilin.

— Ni scios tion, se ni atingos Ereĥon, — diris Aragorno. — Sed la ĵuro, kiun ili rompis, estis, ke ili batalos kontraŭ Saŭronon, kaj ili sekve devos batali, se ili plenumos ĝin. Ĉar ĉe Ereĥo eĉ nun staras nigra ŝtono, kiu estis alportita, oni diris, de Isilduro el Numenoro; kaj ĝi estis starigita sur monteto, kaj sur ĝi la reĝo de la montoj ĵuris lojalecon al li komence de la regno Gondoro. Sed kiam Saŭrono revenis kaj denove iĝis potenca, Isilduro alvokis la homojn de la montoj plenumi la ĵuron, kaj ili rifuzis, ĉar ili adoris Saŭronon dum la Mallumaj Jaroj. Tiam Isilduro diris al ilia reĝo: “Vi estos la lasta reĝo. Kaj se la okcidento pruviĝos pli forta ol via Nigra Mastro, jene mi malbenos vin kaj vian popolon: neniam vi ripozos ĝis via ĵuro estos plenumita. Ĉar tiu ĉi milito daŭros dum jaroj nekalkuleblaj, kaj vi estos denove alvokita antaŭ ĝia fino”. Kaj ili fuĝis antaŭ la kolero de Isilduro, kaj ne kuraĝis militiri subtene al Saŭrono; kaj ili sin kaŝis en lokoj sekretaj en la montaro kaj neniel kontaktis aliajn homojn, sed iom post iom malkreskis en la senfrukta montaro. Kaj timego pri la sendormaj mortintoj ĉirkaŭas la monton Ereĥo kaj ĉiujn lokojn, kie tiu popolo restadis. Sed laŭ tiu vojo mi devos iri, tial ke neniu vivanto povas helpi min.

Li stariĝis.

— Venu! — li kriis kaj elingigis sian glavon, kaj tiu ekbrilis en la duonluma halego de la Burgo. — Al la Ŝtono de Ereĥo! Mi serĉas la Padojn de l’ Mortintoj. Akompanu min, kiuj volas!

Legolaso kaj Gimlio nenion respondis, sed ili leviĝis kaj sekvis Aragornon el la halego. Sur la razeno atendis, senmovaj kaj silentaj, la kapuĉitaj disiruloj. Legolaso kaj Gimlio surĉevaliĝis. Aragorno sursaltis Roherinon. Tiam Halberado levis grandan kornon, kaj ties sonoro eĥis en la Profundaĵo de Helmo, kaj je tio ili forsaltis, rajdante tondre malsupren laŭ la Kavaĵo, dum ĉiuj postrestintoj sur Ŝtonmuro kaj Burgo gapis mirigite.

Kaj dum Teodeno iris laŭ malrapidaj vojetoj sur la montaro, la Griza

Trupo pasis rapide tra la ebenaĵo, kaj la sekvan posttagmezon ili venis al Edoraso; kaj tie ili haltis nur mallonge antaŭ ol supreniri laŭ la valo, kaj tiel venis al Dunharo, kiam vespere mallumiĝis.

Damo Eovina salutis ilin kaj ĝojis pro ilia alveno, ĉar neniun pli fortan ŝi jam vidis, ol la dunadanojn kaj la belajn filojn de Elrondo; sed pleje ĉe Aragorno restis ŝia rigardo. Kaj kiam ili vespermanĝis kun ŝi, ili interparolis, kaj ŝi aŭdis pri tio, kio okazis post la forrajdo de Teodeno, pri kiu ĝis tiam atingis ŝin nur hastaj informoj; kaj kiam ŝi aŭdis pri la batalo en la Profundaĵo de Helmo kaj la granda mortigado de iliaj malamikoj kaj pri la sturmado far Teodeno kaj ties kavaliroj, ŝiaj okuloj brilis. Sed fine ŝi diris:

— Sinjoroj, vi estas lacaj kaj jam iros al viaj litoj kun tia komforto, kian oni povas haste aranĝi. Sed morgaŭ pli taŭga loĝejo estos trovita por vi.

Sed Aragorno diris:

— Ne, damo, ne ĝenu vin pri ni! Se ni povos ripozi ĉi tie hodiaŭ nokte kaj matenmanĝi morgaŭ, tio estos sufiĉa. Ĉar mi rajdas pro komisio plej urĝa, kaj je l' unua lumo de la mateno ni devos foriri.

Ŝi ridetis al li kaj diris:

— Do estis afable farite, moŝto, rajdi tiom da mejloj devie de via vojo por alporti informojn al Eovina, kaj interparoli kun ŝi en ŝia ekzilo.

— Efektive neniu viro taksus tian vojaĝon malŝparo, — diris Aragorno, — kaj tamen, damo, mi venis ĉi tien, ĉar la vojo, kiun mi devos laŭiri, kondukas min al Dunharo.

Kaj ŝi respondis kiel iu, al kiu ne plaĉas la diraĵo:

— Do, sinjoro, vi deviis, ĉar el Harvalo neniu vojo kondukas orienten aŭ suden, kaj prefere vi reiru tiel, kiel vi venis.

— Ne, damo, — li diris, — mi ne deviis, ĉar mi promenis en tiu ĉi lando antaŭ ol vi naskiĝis por ornami ĝin. Ekzistas vojo el tiu ĉi valo, kaj tiun vojon ni iros. Morgaŭ mi rajdos laŭ la Padoj de l' Mortintoj.

Tiam ŝi gapis al li afliktite, kaj ŝia vizaĝo palegiĝis, kaj longe ŝi nenion pli diris, dum ĉiuj sidis silentaj.

— Sed, Aragorno, — ŝi diris fine, — ĉu via komisio estas serĉi la morton? Ĉar nur tion vi trovos sur tiu vojo. Ili ne permesas, ke la vivantoj trapasu.

— Ili devos permesi, ke mi trapasu, — diris Aragorno, — sed mi minimume riskos ĝin. Neniu alia vojo sufiĉos.

— Sed estas frenezaĵo. Ĉar jen estas viroj famaj kaj bravegaj, kiujn vi devus gvidi ne en la ombrojn, sed al milito, kie viroj estas bezonataj. Mi petegas, ke vi restu kaj rajdu kun mia frato, ĉar tiuokaze ĉiuj niaj koroj ĝojegos, kaj nia espero estos eĉ pli hela.

— Ne estas frenezaĵo, damo, ĉar mi iros laŭ pado destinita. Sed tiuj, kiuj sekvas min, tion faras libervole; kaj se ili nun volos resti kaj rajdi kun la rohananoj, ili rajtos tion fari. Sed mi iros la Padojn de l' Mortintoj sola, se necese.

Poste ili diris nenion pli, kaj ili manĝis silente, sed ŝiaj okuloj ĉiam turniĝis al Aragorno, kaj la aliaj vidis, ke mense ŝi tre turmentiĝas. Finfine ili stariĝis kaj adiaŭis la Damon, kaj dankis ŝin pro la prizorgo, kaj iris al sia ripozejo.

Sed kiam Aragorno alvenis la tendon, kie li loĝos kun Legolaso kaj Gimlio, kaj liaj kunuloj jam eniris, Damo Eovina sekvis lin kaj alvokis lin. Li turniĝis kaj vidis ŝin kiel ekbrilon en la nokto, ĉar ŝi estis vestita blanke, kaj ŝiaj okuloj fajreris.

— Aragorno, — ŝi diris, — kial vi iros laŭ tiu danĝerega vojo?

— Ĉar tio necesas. Nur tiel mi vidas esperon plenumi mian rolon en la milito kontraŭ Saŭrono. Vojojn danĝeroplenajn mi ne elektas, Eovina. Se mi irus tien, kie loĝas mia koro, fore en la nordo, mi jam vagus en la bela valo Rivendelo.

Dum kelka tempo ŝi silentis, kvazaŭ meditante la signifon de tio. Poste ŝi subite kaptis lian brakon kaj diris:

— Vi estas mastro severa kaj rezoluta; kaj tiel viroj akiras famon. — Ŝi paŭzis. — Sinjoro, se vi nepre devos iri, permesu, ke mi rajdu inter via sekvantaro. Ĉar min tedas sinkaŝado en la montaro, kaj mi volas fronti danĝeron kaj batalon.

— Via devo estas ĉe via popolo, — li respondis.

— Tro ofte mi aŭdis pri devo, — ŝi ekkriis. — Sed ĉu mi ne estas domano de Eorlo, ŝildulino kaj ne vartistino? Mi jam tro longe atendis sur piedoj hezitemaj. Tial ke ili ne plu hezitas, ŝajne, ĉu mi ne rajtas nun pasigi mian volon propradezire?

— Malmultaj rajtas fari tion kun honoro, — li respondis. — Sed viakaze, damo: ĉu vi ne akceptis la taskon regi la popolon ĝis la reveno de ties mastro? Se vi ne estus elektita, tiuokaze iu marŝalo aŭ trupestro estus starigita sur la saman lokon, kaj tiu ne povus rajdi for de sia respondeco, ĉu aŭ ne li tediĝus pri ĝi.

— Ĉu ĉiam estos elektita mi? — ŝi diris amare. — Ĉu oni ĉiam postlasos min, kiam la rajdistoj foriras, por prizorgi la domon, dum ili akiras famon, kaj trovi manĝaĵojn kaj litojn, kiam ili revenas?

— Eble baldaŭ venos okazo, — li diris, — kiam revenos neniu. Tiam necesos kuraĝo sen famo, ĉar neniu memoros la farojn de la lasta defendado de viaj hejmoj. Tamen la faroj ne estos malpli bravaj pro tio, ke ili estos nelaŭditaj. Kaj ŝi respondis:

— ĉiuj viaj vortoj diras nur: vi estas virino, kaj via rolo estas en la domo. Sed kiam la viroj mortos en batalo kun honoro, al vi estos permesite bruliĝi en la domo, ĉar la viroj ne plu bezonos ĝin. Sed mi estas domano de Eorlo kaj ne servistino. Mi scias rajdi kaj uzi la klingon, kaj mi timas nek doloron nek morton.

— Kion vi timas, damo? — li demandis.

— Kaĝon, — ŝi diris. — Resti malantaŭ krado, ĝis kutimiĝo kaj maljuneco akceptos tion, kaj ĉiu ebleco fari bravajn agojn foriros preter revoko aŭ deziro.

— Tamen vi konsilis min ne riski la vojon, kiun mi elektis, pro tio, ke ĝi estas danĝera, ĉu ne?

— Tiel oni rajtas konsili aliulon. Tamen mi ne diris, ke vi evitu danĝeron, sed rajdu al batalo, kie via glavo eble akiros famon kaj venkon. Mi ne volus vidi ion altan kaj bonegan nenecese forĵetita.

— Ankaŭ mi ne, — li diris. — Tial mi diras al vi, damo: restu! Ĉar vi havas neniun komision iri suden.

— Kiel ankaŭ ne havas tiuj, kiuj akompanos vin. Ili iros nur, ĉar ili ne volas esti disigitaj de vi; ĉar ili amas vin. — ŝi turniĝis kaj malaperis en la nokton.

Kiam la taga lumo aperis sur la ĉielo, sed la suno ankoraŭ ne leviĝis super la altajn firstojn en la oriento, Aragorno pretiĝis por foriro. Lia trupo estis jam surĉevala, kaj li estis saltonta sur la selon, kiam Damo Eovina venis por adiaŭi ilin. Ŝi estis rajdiste vestita kaj ĉezone portis glavon. En sia mano ŝi portis tason, kaj ĝin ŝi metis al siaj lipoj kaj trinkis iomete, dezirante al ili bonan sorton; kaj poste ŝi donis la tason al Aragorno, kaj tiu trinkis, kaj li diris:

— Adiaŭ, Damo de Rohano! Mi tostas la fortunojn de via Domo, kaj de vi, kaj de via tuta popolo. Diru al via frato: post la ombroj ni eble renkontiĝos denove!

Tiam ŝajnis al Gimlio kaj Legolaso, kiuj estis proksimaj, ke ŝi ploras, kaj ĉe iu tiel severa kaj fiera tio ŝajnis eĉ pli doloriga. Sed ŝi diris:

— Aragorno, ĉu vi volas iri?

— Mi volas.

— Do ĉu vi ne permesos, ke mi rajdu kun tiu ĉi trupo, kiel mi petis?

— Tion mi ne permesos, damo, ĉar tion mi ne permesus sen konsento de la reĝo kaj de via frato; kaj ili ne revenos antaŭ morgaŭ. Sed mi jam kalkulas ĉiun horon, fakte ĉiun minuton. Adiaŭ!

Tiam ŝi falis surgenuen, dirante:

— Mi petegas!

— Ne, damo, — li diris, kaj kaptinte ŝian manon li starigis ŝin. Poste li

kisis ŝian manon, salte surseliĝis, forrajdis kaj ne retrorigardis, kaj nur tiuj, kiuj konis lin intime kaj apudis lin, vidis la doloron, kiun li suferis.

Sed Eovina staris senmova kiel figuro skulptita el ŝtono, kun la manoj pugnigitaj ĉe sia flanko, kaj ŝi rigardis ilin, ĝis ili eniris la ombrojn sub la nigra Dvimorbergo, la Hantata Monto, sur kiu estis la Pordo de l' Mortintoj. Kiam ili pasis el la vidkampo, ŝi turniĝis, stumblante kvazaŭ blinda, kaj reiris al sia loĝejo. Sed neniu el ŝia popolo vidis tiun disiĝon, ĉar ili sin kaŝis pro timo kaj ne eliris ĝis la plena tago, kaj la malprudentaj vojaĝantoj jam foriris.

Kaj kelkaj diris:

— Tiuj estas elfaj personoj. Ili iru tien, kie ili indiĝenas, al la lokoj mallumaj, kaj neniam revenu. La epoko jam sufiĉe misas.

La lumo ankoraŭ grizis, dum ili rajdis, ĉar la suno ankoraŭ ne grimpis super la nigrajn firstojn de la Hantata Monto antaŭ ili. Antaŭtimo kroĉiĝis al ili, precize kiam ili trapasis inter la vicoj de antikvaj ŝtonoj kaj tiel venis al Dimholto. Tie sub la morno de nigraj arboj, kiun eĉ Legolaso ne povis longe toleri, ili trovis kavan lokon faŭkantan ĉe la monta radiko, kaj ĝuste sur ilia vojo staris unuopa fortika ŝtono kvazaŭ fingro de fortuno.

— Mia sango fluas fridege, — diris Gimlio, sed la aliaj silentis, kaj lia voĉo falis dampite al la humidaj abipingloj ĉe liaj piedoj. La ĉevaloj ne volis pasi la minacan ŝtonon, ĝis la rajdantoj elseliĝis kaj kondukis ilin ĉirkaŭen. Kaj tiel ili alvenis finfine en la profundon de la valo; kaj tie staris kruta rokmuro, kaj en la muro la Malhela Pordo faŭkis antaŭ ili kvazaŭ la noktobuŝo. Signoj kaj figuroj estis ĉizitaj super ĝia larĝa arkaĵo tro malklaraj por legi, kaj timo disfluis el ĝi kvazaŭ griza vaporo.

La trupo haltis, kaj inter ili neniu koro ne tremegis, krom eble nur la koro de Legolaso el la elfoj, kiun ne teruras la fantomoj de homoj.

— Tiu pordo estas misaŭgura, — diris Halberado, — kaj post ĝi kuŝas mia morto. Tamen mi aŭdacos trapasi ĝin; sed neniu ĉevalo volos eniri.

— Sed ni devas eniri, kaj sekve ankaŭ la ĉevaloj devos, — diris Aragorno. — Ĉar se ni entute trapasos tiun ĉi mallumon, multaj leŭgoj troviĝas aliflanke, kaj ĉiu horo perdita pliproksimigas la triumfon de Saŭrono. Sekvu min!

Aragorno iris la unua, kaj tioma estis lia volforto en tiu horo, ke sekvis lin ĉiuj dunadanoj kaj ties ĉevaloj. Kaj efektive la amo, kiun la ĉevaloj de la disiruloj sentis al siaj rajdantoj, estis tiel granda, ke ili pretis konfronti eĉ la teruron de la Pordo, se la koroj de iliaj mastroj estus senŝancelaj, dum ili marŝas apude. Sed Arodo, la ĉevalo de Rohano, rifuzis la vojon, kaj ĝi staris ŝvitante kaj tremante pro timo, kiun vidi dolorigis. Tiam Legolaso kovris ties okulojn per la manoj kaj kantis kelkajn vortojn, kiuj sonis mallaŭte en la

malhelo, ĝis ĝi permesis gvidi sin, kaj Legolaso eniris. Kaj staris tie la gnomo Gimlio, lasite tute sola.

Liaj genuoj tremis, kaj li koleris pri si.

— Jen afero senprecedenca! — li diris. — Elfo iras subteren, kaj gnomo tion ne aŭdacas! — Post tio li ensaltis. Sed al li ŝajnis, ke liaj kruroj plumbece treniĝas trans la sojlon; kaj blindeco tuj trafis lin, eĉ Gimlion, filon de Gloino, kiu promenis netimigite en multaj profundaj lokoj en la mondo.

Aragorno alportis torĉojn el Dunharo, kaj nun li iris antaŭe portante torĉon alte; kaj kun alia iris Eladano malantaŭe, kaj Gimlio, stumblante poste, klopodis atingi lin. Li povis vidi nenion krom la malfortan flamon de la torĉoj; sed kiam la trupo haltis, ŝajne aŭdiĝis ĉirkaŭ li senfina voĉflustrado, murmuro de vortoj en lingvo, kiun li neniam antaŭe aŭdis.

Nenio atakis la trupon aŭ kontraŭstaris ties trapason, kaj tamen timo poiome kreskis en la gnomo, dum li pluiris: plejparte ĉar li jam sciis, ke retroiro ne plu eblas; ĉiuj padoj malantaŭe estis plenplenaj de nevidata amaso, kiu sekvis tra la mallumo.

Tiel pasis tempo nekalkulebla, ĝis Gimlio vidis ion, kion ĉiam poste li malvolonte rememoris. La vojo estis larĝa, kiom li povis juĝi, sed nun la trupo subite venis al granda malplenaĵo, kaj ne plu estis muroj ambaŭflanke. Tiom pezis sur lin la teruro, ke li apenaŭ kapablis marŝi. Fore maldekstre io briletis en la sombro, kiam proksimiĝis la torĉo de Aragorno. Tiam Aragorno haltis kaj iris rigardi, kio estas tio.

— Ĉu neniun timon li spertas? — murmuris la gnomo. — En ajna alia kaverno Gimlio, filo de Gloino, kurus la unua al ekbrilo de oro. Sed ne ĉi tie! Lasu ĝin kuŝanta!

Tamen li proksimiĝis, kaj vidis Aragornon genuanta, dum Eladano tenis alte ambaŭ torĉojn. Antaŭ li estis la ostoj de fortegulo. Li estis vestita en maŝkiraso, kaj lia armaĵo ankoraŭ kuŝis tie senmanka, ĉar la kaverna aero estis seka kiel polvo, kaj lia kiraso estis orumita. Lia zono estis el oro kaj grenatoj, kaj riĉe ora estis la kasko sur lia osta kapo kuŝanta vizaĝaltere. Li falis proksime al la fora muro de la kaverno, kiel estis nun videble, kaj antaŭ li staris ŝtona pordo strikte fermita: liaj fingrostoj ankoraŭ ungotenis la fendetojn. Apud li kuŝis noĉita kaj rompita glavo, kvazaŭ dum sia lasta malespero li batadus la rokon.

Aragorno ne tuŝis lin, sed post iom da silenta rigardado li stariĝis kaj suspiris:

— Ĉi tien neniam venos floroj de *simbelmyne* ĝis la mondofino, — li murmuris. — Naŭ plus sep dolmenoj nun herboverdas, kaj dum ĉiuj longaj jaroj li kuŝis antaŭ la pordo, kiun li ne povis malŝlosi. Kien ĝi kondukas?

Kial li volis trapasi? Neniu iam scios!.. Ĉar ne tio estas mia komisio! — li kriis, returniĝante kaj parolante al la flustra mallumo malantaŭe. — Tenu kaŝitaj viajn trezorojn kaj viajn sekretojn en la Malbenitaj Jaroj! Nur rapidon ni postulas. Lasu nin pasi, kaj poste venu! Mi alvokas vin al la ŝtono de Ereĥo.

Venis neniu respondo, krom se temis pri kompleta silento pli timiga ol la antaŭaj flustroj; kaj poste venis frosta trablovo, pro kiu la torĉoj flagris kaj estingiĝis, kaj ne povis esti refajrigitaj. Pri la tempo, kiu sekvis, unu horo aŭ multaj, Gimlio memoris malmulton. La aliaj antaŭeniris, sed li ĉiam estis la lasta, persekutate de palpa teruraĵo, kiu ŝajnis ĉiam kaptonta lin; kaj brueto postsekvis lin kvazaŭ ombrosono de multaj piedoj. Li stumbladis antaŭen, ĝis li rampis beste sur la tero kaj sentis, ke li nenion pli kapablas toleri: li devos aŭ trovi finejon kaj eskapi aŭ retrokuri en frenezo renkonte al la persekutanta timo.

Subite li aŭdis tintadon de akvo, sonon duran kaj klaran kiel ŝtono enfalanta sonĝon de malhela ombro. Lumo plifortiĝis, kaj jen! la trupo trapasis alian pordejon, altarkaĵan kaj larĝan, kaj rojo elfluis apude; kaj poste, iranta apike suben, estis vojo inter krutaj klifoj, tranĉileĝaj kontraŭ la ĉielo fore supra. Tiel profunda kaj mallarĝa estis tiu abismo, ke la ĉielo malhelis, kaj sur ĝi briletis malgrandaj steloj. Tamen kiel Gimlio poste eksciis, mankis ankoraŭ du horoj ĝis sunsubiro de la tago, en kiu ili ekiris de Dunharo; kvankam laŭ lia tiama taksopovo povus esti krepusko en iu posta jaro, aŭ en iu alia mondo.

La trupo nun surseliĝis denove, kaj Gimlio reiris al Legolaso. Ili rajdis spalire, kaj vespero venis kaj profunde blua krepusko; kaj daŭre timo persekutis ilin. Legolaso turninte sin por paroli al Gimlio retrorigardis, kaj la gnomo vidis antaŭ sia vizaĝo ekbrilon en la helaj okuloj de la elfo. Malantaŭ ili rajdis Eladano, lasta el la trupo, sed ne lasta el tiuj, kiuj laŭiris la vojon suben.

— La mortintoj sekvas, — diris Legolaso. — Mi vidas figurojn de homoj kaj de ĉevaloj, kaj palajn standardojn kiel nubĉifonojn, kaj lancojn kiel vintrajn densejojn dum nokto nebuloza. La mortintoj sekvas.

— Jes, la mortintoj rajdas malantaŭe. Ili estas alvokitaj, — diris Eladano.

La trupo venis finfine el la ravino, tiel subite, kvazaŭ ili eliris tra fendeto en muro; kaj antaŭ ili kuŝis la altaĵoj de granda valo, kaj la rojo apud ili malsupreniris fridvoĉe tra multaj akvofaloj.

— Kie en Mez-Tero ni estas? — diris Gimlio, kaj Eladano respondis:

— Ni descendis de la fonto de Morthondo, la longa malvarma rivero, kiu fluas fine al tiu maro, kiu lavas la murojn de Dol Amroto. Ne necesos al

vi demandi, de kie venas ĝia nomo: oni nomas ĝin Nigroradiko.

La Morthonda Valo formis grandan golfeton, kiu premiĝis al la krutaj sudaj facoj de la montaro. Ĝiaj apikaj deklivoj estis herbokovritaj; sed ĉio estis griza en tiu horo, ĉar la suno jam foriris, kaj fore sube briletis lumoj en la domoj de homoj. La valo estis fekunda, kaj multaj loĝis tie.

Poste sen returniĝo Aragorno laŭte kriis tiel, ke ĉiuj povu aŭdi:

— Amikoj, forgesu pri via laco! Rajdu jam, rajdu! Ni devas veni al la Ŝtono de Ereĥo antaŭ ol forpasos tiu ĉi tago, kaj ankoraŭ longa estas la vojo.

Do sen rerigardo ili trarajdis la montajn kampojn, ĝis ili alvenis ponton super la plifortiĝanta torento kaj trovis padon, kiu subeniris al la ebenaĵo.

Lumoj estingiĝis en domoj kaj vilaĝoj, kiam ili alvenis, kaj pordoj estis fermitaj, kaj homoj eksterdomaj kriegis pro timo kaj kuris freneze kiel ĉasataj cervoj. Ĉiam leviĝis sama krio en la densiĝanta krepusko:

— La reĝo de l' mortintoj! La reĝo de l' mortintoj venas al ni! Sonoriloj aŭdiĝis en la fora subo, kaj ĉiuj homoj fuĝis antaŭ la vizaĝo de Aragorno; sed la Griza Trupo pro sia hasto rajdis kiel ĉasistoj, ĝis iliaj ĉevaloj stumblis pro elĉerpiĝo. Kaj tiel, ĝuste antaŭ la noktomezo, kaj en mallumo nigra kiel la montaraj kavernoj, ili finfine venis al la Monto de Ereĥo.

Delonge teruro pri la mortintoj okupis tiun monton kaj la malplenajn kampojn ĉirkaŭ ĝi. Ĉar sur la supro staris nigra ŝtono, ronda kiel globego, samalta kiel homo, kvankam duone ĝi estis enterigita. Netera ĝi aspektis, kvazaŭ ĝi falus el la ĉielo, kiel kredis iuj; sed tiuj, kiuj ankoraŭ memoris la tradiciojn de Okcidentio, rakontis, ke ĝi estis alportita el la ruina Numenoro kaj starigita tie de Isilduro post ties albordiĝo. Neniuj el la valanoj aŭdacis proksimiĝi al ĝi, kiel ili ankaŭ rifuzis loĝi proksime; ĉar oni diris, ke ĝi estas renkontejo de la ombruloj, kiuj kuniĝas en epokoj timoplenaj, amasiĝante ĉirkaŭ la Ŝtono kaj flustrante.

Al tiu ŝtono venis la trupo kaj haltis en la senluma nokto. Tiam Elrohiro transdonis al Aragorno arĝentan kornon, kaj tiu blovis ĝin; kaj ŝajnis al la apudstarantoj, ke ili aŭdas bruon de respondantaj kornoj, kvazaŭ eĥon en profundaj kavernoj malproksimaj. Neniun alian sonon ili aŭdis, kaj tamen ili konsciis pri granda amaso kuniĝinta ĉirkaŭ la monto, sur kiu ili staris; kaj frosta vento, kiel spiro de fantomoj, descendis de la montaro. Sed Aragorno elseliĝis, kaj starante apud la Ŝtono li laŭte kriis:

— Ĵurrompintoj, kial vi venis?

Kaj voĉo aŭdiĝis tra la nokto, kaj respondis al li, kvazaŭ de tre fore:

— Por plenumi nian ĵuron kaj trovi trankvilon. Poste Aragorno diris:

— Finfine venas la horo. Nun mi iros al Pelargiro sur Anduino, kaj vi sekvos min. Kaj kiam tiu ĉi tuta lando estos purigita de l' servantoj de Saŭrono, mi taksos la ĵuron plenumita, kaj vi havos trankvilon kaj foriros

por ĉiam. Ĉar mi estas Elesaro, heredinto de Isilduro en Gondoro.

Kaj tion dirinte li ordonis, ke Halberado malvolvu la grandan standardon, kiun li alportis; kaj jen! ĝi estis nigra, kaj se estis sur ĝi iu signo, tiu estis kaŝita en la mallumo. Poste estis silento, kaj nek flustro, nek suspiro denove aŭdeblis tra la tuta longa nokto. La trupo bivakis apud la Ŝtono, sed ili malmulte dormis, pro timo pri la ombroj, kiuj ĉirkaŭbaris ilin.

Sed kiam la tagiĝo venis, malvarma kaj pala, Aragorno leviĝis haste, kaj li kondukis for la trupon al vojaĝo plej rapidega kaj laciga el la spertitaj de ĉiuj, krom nur li, kaj nur lia volo konvinkis ilin pluiri. Neniuj aliaj mortemuloj povus toleri tion, sed nur la dunadanoj el la nordo, kaj kun tiuj gnomo Gimlio kaj elfo Legolaso.

Ili preterpasis la Kolon de Tarlango kaj venis en Lamedonon; kaj la ombra armeo premis malantaŭe kaj timo antaŭiris ilin, ĝis ili alvenis Kalembelon sur Cirilo, kaj la suno malsupreniris kvazaŭ sango post Pinato Gelin en la fora okcidento malantaŭ ili. La urbon kaj la travadejojn de Cirilo ili trovis dizertitaj, ĉar multaj viroj foriris al la milito, kaj ĉiuj restintoj fuĝis al la montaro pro onidiro pri proksimiĝo de la reĝo de l' mortintoj. Sed la postan tagon venis neniu aŭroro, kaj la Griza Trupo pluiris en la mallumon de la ŝtormo de Mordoro kaj forpasis el la homa vidkampo; sed sekvis ĝin la mortintoj.

3

La apelo en Rohano

Nun ĉiuj vojoj kune kondukis orienten por renkonti la alvenon de milito kaj la atakon de la Ombro. Kaj ĝuste kiam Grinĉjo staris ĉe la Granda Pordego de la Urbo kaj vidis la princon de Dol Amroto trarajdi kun siaj standardoj, la Reĝo de Rohano venis malsupren de la montaro.

La tago ekvelkis. En la lastaj sunradioj la rajdistoj kreis longajn pintajn ombrojn, kiuj antaŭiris ilin. Mallumo jam rampis sub la murmurajn abiarojn, kiuj vestis la krutajn montflankojn. La reĝo rajdis jam malrapide je fino de la tago. Baldaŭ la pado ĉirkaŭiris grandan nudan rokŝultron kaj plonĝis en la sombron de softsusuraj arboj. Suben, suben ili iris en longa serpentuma spaliro. Kiam fine ili alvenis la fundon de la ravino, ili konstatis, ke jam vesperiĝis en la profundejoj. Foriris la suno. Krepusko kovris la akvofalojn.

Tra la tuta tago sub ili salta rivereto suben impetis el la alta pasejo malantaŭe, tranĉante sian mallarĝan vojon inter pinkovritaj muroj; kaj nun tra ŝtona pordo ĝi elfluis kaj eniris valon pli larĝan. La rajdistoj sekvis ĝin, kaj subite Harvalo kuŝis antaŭ ili, laŭta pro la akvobruo en la vespero. Tie la blanka Neĝburno, al kiu aliĝis la fluo malpli granda, impetis, vaporante kontraŭ la ŝtonoj, suben al Edoraso kaj la verdaj montetoj kaj la ebenaĵo. Fore dekstre ĉekape de la granda valo baŭmis la fortika Starkhorno kun vastaj apogaĵoj nubvolvitaj; sed ties akr-eĝa pinto, vestita per eterna neĝo, brilis forege super la tero, bluombra oriente, sunsubire ruĝmakulita okcidente.

Gaja rigardis mire tiun strangan landon, pri kiu li aŭdis multajn rakontojn dum la longa vojaĝo. Ĝi estis mondo senĉiela, je kiu liaj okuloj, tra malklaraj golfoj da ombreca aero, vidis nur deklivojn ĉiam pli suprenirajn, ŝtonmuregojn malantaŭ muregoj, kaj brovumantajn krutegaĵojn nebulvolvitajn. Li sidis momente duonreve, aŭskultante la bruon de la akvo, la flustron de malhelaj arboj, krakadon de ŝtonoj, kaj la vastan embuskan silenton post ĉiuj sonoj. Montojn li amis, aŭ iam amis pensi pri ili rande de historioj alportitaj de malproksime; sed nun lin premis la netolerebla pezo de Mez-Tero. Li sopiris forbari la vastecon en kvieta ĉambro apud fajrujo.

Li estis tre laca, ĉar malgraŭ tio, ke ili rajdis malrapide, ili rajdis kun tre malmulte da ripozo. Horon post horo dum preskaŭ tri lacigaj tagoj li trote supren-subeniris, trans pasejojn kaj tra longaj valoj, kaj trans multajn

riveretojn. Kelkfoje kiam la vojo estis pli larĝa li rajdis apud la reĝo, ne rimarkante, ke multaj rajdistoj ridetis vidante tiujn du kune: la hobiton sur la vila griza poneo kaj la Mastron de Rohano sur la blanka ĉevalego. Li ankaŭ interparolis kun Teodeno, rakontante al li pri sia hejmo kaj pri la faraĵoj de la provincanoj, aŭ reciproke aŭskultante rakontojn pri Markio kaj ties fortikuloj en la malnova tempo. Sed plejparte, precipe dum tiu ĉi lasta tago, Gaja rajdis sola ĝuste postla reĝo, dirante nenion, kaj klopodante kompreni la malrapidan sonoran paroladon rohanan, kiun li aŭdis la virojn malantaŭajn uzadi. Tio estis lingvo, en kiu ŝajne troviĝis multaj vortoj al li konataj, kvankam prononcitaj pli riĉe kaj forte ol en la Provinco, tamen li ne povis kunligi la vortojn. De tempo al tempo iu rajdisto ekkantis stimule per klara voĉo, kaj Gaja sentis sian koron respondi, kvankam li ne sciis, pri kio temas.

ĉiuokaze li sentis sin soleca, kaj neniam pli ol nun en la fino de la tago. Li scivolis kien en tiu ĉi stranga mondo Grinĉjo alvenis; kaj kiel fortunos Aragorno, Legolaso kaj Gimlio. Tiam subite, kvazaŭ frosto tuŝus lian koron, li pensis pri Frodo kaj Sam. “Mi forgesas pri ili! — li diris al si riproĉe. — Kaj tamen ili pli gravas ol ĉiuj ni ceteraj. Kaj mi venis por helpi ilin; sed nun ili certe foras centojn da mejloj, se ili plu vivas”. Li ektremis.

— Harvalo finfine! — diris Eomero. — Nia vojaĝo preskaŭ finiĝis. Ili haltis. La padoj el la mallarĝa ravino descendis abrupte. Nur fragmente, kvazaŭ tra alta fenestro, vidiĝis la valego en la suba krepusko. Unuopa eta lumo videblis ekbrile apud la rivero.

— Eble finiĝis tiu ĉi vojaĝo, — diris Teodeno, — sed mi devos ankoraŭ longe pluiri. Hieraŭ nokte estis plenluno, kaj matene mi rajdos al Edoraso por la apelo de Markio.

— Sed se vi volus akcepti mian konsilon, — diris Eomero mallaŭte, — vi poste revenus ĉi tien, ĝis la milito finiĝus, ĉu venke, ĉu malvenke.

Teodeno ridetis.

— Ne, filo mia, ĉar tiel mi volas nomi vin, ne parolu la insidajn vortojn de Vermlango al miaj maljunaj oreloj! — Li rektigis sin kaj retrorigardis al la longa vico de siaj viroj malaperantaj en la krepuskon malantaŭe. — Longaj jaroj dum kelkaj tagoj ŝajnas al mi, de kiam mi ekrajdis okcidenten; sed neniam plu mi apogos min per bastono. Se milite ni malvenkos, kiom utilos mia sinkaŝado inter la montoj? Kaj se ni venkos, kiel tio malĝojigos, eĉ se mi pereos uzante mian lastan forton? Sed nun mi rezignos pri tio. Ĉi-nokte mi ripozos en la fortikaĵo de Dunharo. Unu vespero da paco ankoraŭ restas al ni. Ni rajdu antaŭen!

En la profundiĝanta krepusko ili venis malsupren en la valon. Tie Neĝburno fluis proksime al la okcidentaj flankoj de la valo, kaj baldaŭ la

pado kondukis ilin al travadejo, kie la malprofunda akvo murmuris kontraŭ la ŝtonoj. La travadejo estis gardata. Kiam la reĝo proksimiĝis, multaj viroj saltaperis el la ombro de la rokoj; kaj vidante la reĝon ili ekkriis ĝoje:

— Reĝo Teodeno! Reĝo Teodeno! La Reĝo de Markio revenis! Poste iu blovis longan signalon per korno. Tiu eĥis en la valo. Aliaj kornoj respondis, kaj lumoj ekbrilis trans la rivero.

Kaj subite aŭdiĝis granda ĥoro da trumpetoj el altsupre, sonorante el iu loko kava, kiel ŝajnis, kiu kunrastis la notojn al unu voĉo kaj sendis tiun ruliĝantan kaj batantan la ŝtonmurojn.

Tiel la Reĝo de Markio revenis venke el la okcidento al Dunharo sube de la Blankaj Montoj. Tie li trovis jam kuniĝinta la restantan forton de sia popolo; ĉar tuj kiam diskoniĝis lia alveno, komandantoj rajdis renkonte al li ĉe la travadejo, portante mesaĝojn de Gandalfo. Dunhero, ĉefo de la homoj en Harvalo, venis la unua.

— Je aŭroro antaŭ tri tagoj, mastro, — li diris, — Ombrofakso venis ventece el la okcidento al Edoraso, kaj Gandalfo havigis informon pri via venko, kiu ĝojigis niajn korojn. Sed li havigis ankaŭ sciigon de vi, ke oni rapidigu la apelon de l' rajdistoj. Kaj poste venis la flugilhava Ombro.

— Ĉu la flugilhava Ombro? — diris Teodeno. — Ankaŭ ni vidis ĝin, sed tio okazis meze de la nokto antaŭ ol Gandalfo forlasis nin.

— Eble, moŝto, — diris Dunhero. — Tamen tiu sama, aŭ alia similа, fluganta mallumaĵo en formo de monstra birdo, pasis super Edoraso tiun matenon, kaj ĉiuj skuiĝis pro timo. Ĉar ĝi plonĝis al Meduseldo, kaj kiam ĝi malaltiĝis, preskaŭ ĝis la gablo, aŭdiĝis krio, kiu haltigis niajn korojn. Tiam do Gandalfo konsilis, ke ni ne faru apelon sur la kampoj, sed renkontu vin ĉi tie en la valo sub la montoj. Kaj li ordonis, ke ni ne bruligu pli da lumoj aŭ fajroj ol postulas la plej urĝa neceso. Tiel ni faris. Gandalfo parolis obeige. Ni esperas, ke tio estas laŭ via deziro. Nenion oni vidis en Harvalo el tiuj fiaĵoj.

— Estas bone, — diris Teodeno. — Jam mi rajdos al la Fortikaĵo, kaj tie antaŭ ol ekripozi mi renkontos la marŝalojn kaj komandantojn. Ili venu al mi laŭeble baldaŭ!

La vojo nun kondukis orienten rekte trans la valon, kiu tiupunkte estis malmulte pli ol duonmejlon larĝa. Platejoj kaj kampoj da malmola herbo, nun grizaj en la velkanta taglumo, ĉirkaŭkuŝis, sed antaŭe je la fora flanko de la valo Gaja vidis brovumantan muron, lastan limon de la grandaj radikoj de Starkhorno, fenditaj de la rivero en praepoko.

Sur ĉiuj ebenejoj estis granda homamaso. Iuj premiĝis al la vojflanko, salutante per ĝojaj krioj la reĝon kaj la rajdintojn el la okcidento; sed etendiĝintaj al la fora malproksimo malantaŭe estis ordaj vicoj da tendoj kaj

budoj, kaj spaliroj da krurligitaj ĉevaloj, kaj granda stoko da armiloj, kaj staplitaj lancoj hirtaj kiel densejoj da nove plantitaj arboj. Nun la granda homamaso kovriĝis de ombro, kaj tamen, malgraŭ ke bloviĝis de la altaĵoj nokta malvarmo, ardis neniuj lanternoj, neniuj fajroj estis bruligitaj. Sentineloj peze mantelitaj paŝis tien kaj reen.

Gaja scivolis, kiom da rajdistoj ĉeestas. Li ne povis diveni ties nombron en la kreskanta malhelo, sed ĝi ŝajnis al li granda armeo el miloj da homoj. Dum li gapis de flanko al flanko, la reĝa trupo venis sub la baŭmantan klifon orientflanke de la valo; kaj tie subite la pado komencis supreniri, kaj Gaja mirante rigardis supren. Li estis sur tia vojo, kian li neniam antaŭe vidis, granda faraĵo de homaj manoj en jaroj preter atingo de la kantoj. Supren ĝi turniĝadis, kvazaŭ serpente volviĝanta, ŝovante sian direkton trans la apikan rokdeklivon. Kruta kiel ŝtuparo, ĝi kurbiĝis tien kaj reen dum la ascendo. Laŭ ĝi ĉevaloj povis marŝi, kaj furgonojn oni povis malrapide treni; sed neniu malamiko kapablis iri tiuvoje, krom el la aero, se oni defendis ĝin supre. Ĉe ĉiu vojturno estis starantaj ŝtonegoj, kiuj estis ĉizitaj homsimile, grandegaj kaj krudmembraj, sidantaj kruckrure kun la stumpaj brakoj kunfalditaj sur grasaj ventroj. Kelkaj pro la tempo jam perdis ĉiujn vizaĝtrajtojn krom la malhelaj truoj, kiuj plu rigardadis triste la preterpasantojn. La rajdistoj apenaŭ ekrigardis ilin. Pukel-homoj oni nomis ilin, kaj malmulte atentis ilin: en ili restis plu neniom da potenco aŭ teruro; sed Gaja rigardis ilin mire kaj sentante preskaŭ kompaton, kiam ili baŭmis morne en la krepusko.

Post kelka tempo li retrorigardis kaj konstatis, ke li jam grimpis kelkcent futojn super la valo, sed fore sube li ankoraŭ povis malklare vidi serpentumantan spaliron da rajdistoj, trairantaj la vadejon kaj sekvantaj laŭ la vojo al la bivakejo preparita por ili. Nur la reĝo kaj ties gardistaro estis supreniranta en la Fortikaĵon.

Finfine la reĝa trupo alvenis abruptan randon, kaj la grimpanta vojo enpasis tranĉaĵon inter rokmuroj, kaj tiel supreniris mallongan deklivon kaj eksteren sur larĝan altejon. Tion oni nomis Firenfeldo, verda montara kampo da herbo kaj erikoj, alta super la profunde fositaj fluejoj de Neĝburno, kuŝigita sur la sino de la grandaj montoj malantaŭe: sude Starkhorno kaj norde la segildenta maso de Irensago, inter kiuj frontis al la rajdistoj la malafabla nigra muro de Dvimorbergo, la Hantata Monto leviĝanta el krutaj deklivoj de sombraj pinoj. Disduigante la altejon etendiĝis duobla spaliro da starantaj ŝtonoj, malklariĝanta en la krepusko kaj malaperanta inter la arboj. Kiuj riskis sekvi tiun vojon, tiuj baldaŭ alvenis la nigran Dimholton sub Dvimorbergo, kaj la minacon de l’ ŝtonpilastro, kaj la oscedan ombron de la malpermesita pordo.

Tia estis malhela Dunharo, konstruita de homoj longe forgesitaj. Ilia nomo estis perdita kaj neniu kanto aŭ legendo memorigis pri ili. Kiucele ili kreis tiun lokon, kiel urbon aŭ sekretan templon aŭ tombon de reĝoj, neniu jam sciis. Tie ili laboris dum la Malhelaj Jaroj, eĉ antaŭ ol venis ŝipo al la okcidentaj marbordoj, kaj antaŭ ol la dunadanoj ekkonstruis Gondoron; kaj nun ili estis malaperintaj, kaj nur la Pukel-homoj postrestis, daŭre sidantaj apud la vojturnoj.

Gaja gapis al la vicoj de etendiĝantaj ŝtonoj: ili estis trivitaj kaj nigraj; iuj kliniĝis, iuj jam falis, iuj estis fenditaj aŭ rompitaj; ili aspektis kiel vicoj da maljunaj kaj malsataj dentoj. Li scivolis, kio ili estis, kaj li esperis, ke la reĝo ne intencas sekvi ilin poste en la mallumon. Poste li vidis, ke ambaŭflanke de l' ŝtonoza vojo troviĝis tendoj kaj budoj; sed tiuj ne estis starigitaj proksime al la arboj, kaj ŝajnis prefere kunpremiĝi for de ili en la direkto de la klifrando. Ili estis pli multaj dekstre, kie Firenfeldo estis pli larĝa; kaj maldekstre troviĝis tendaro pli malgranda, en kies mezo staris alta pavilono. De tiu flanko nun venis rajdanto renkonte al ili, kaj ili turniĝis for de la vojo.

Kiam ili proksimiĝis, Gaja konstatis, ke la rajdanto estas virino kun longaj plektitaj haroj ekbrilantaj en la krepusko, tamen ŝi portis kaskon kaj estis ĝistalie vestita bataliste kaj zonita kun glavo.

— Saluton, Mastro de Markio! — ŝi kriis. — Mia koro ĝojas pro via reveno.

— Kaj al vi, Eovina, — diris Teodeno, — ĉu ĉio en ordo ĉe vi?

— Ĉio en ordo, — ŝi respondis, tamen ŝajnis al Gaja, ke ŝia voĉo kontraŭdiris tion, kaj li supozus ĝin plori, se tio kredeblus pri iu tiel severtrajta. — Ĉio en ordo. Tio estis vojo laciga al la popolo subite ŝirita de siaj hejmoj. Aŭdiĝis krudaj vortoj, ĉar jam delonge milito ne forpelis nin el la verdaj kampoj, sed mankis misfarado. Ĉio estas jam ordigita, kiel vi vidas. Kaj via loĝejo estas preta por vi, ĉar mi estas plene informita pri vi kaj mi sciis la horon de via alveno.

— Do, Aragorno jam venis, — diris Eomero. — Ĉu li ankoraŭ estas ĉi tie?

— Ne, li foriris, — diris Eovina, sin forturnante kaj rigardante la malhelajn montojn antaŭ la oriento kaj la sudo.

— Kien li iris? — demandis Eomero.

— Mi ne scias, — ŝi respondis. — Li venis nokte, kaj forrajdis hieraŭ matene, antaŭ ol la suno grimpis super la montopintojn. Li estas for.

— Vi malĝojas, filino, — diris Teodeno. — Kio okazis? Diru, ĉu li parolis pri tiu vojo? — li indikis laŭ la malheliĝanta linio de ŝtonoj al la Dvimorbergo. — Pri la Padoj de l' Mortintoj?

— Jes, mastro, — diris Eovina. — Kaj li eniris la ombrojn, el kiuj neniu revenis. Mi ne povis malinstigi lin. Li estas for.

— Sekve niaj vojoj estas disigitaj, — diris Eomero. — Li estas perdita. Ni devos rajdi sen li, kaj nia espero malfortiĝas.

Malrapide ili trapasis la mallongan erikejon kaj altejan herbon, ne plu parolante, ĝis ili alvenis la reĝan pavilonon. Tie Gaja konstatis, ke ĉio estas pretigita, kaj ke li mem ne estas forgesita. Eta tendo estis starigita por li apud la reĝa loĝejo, kaj tie li sidis sola, dum homoj iris tien-reen enirante al la reĝo kaj konsiliĝante kun li. Nokto profundiĝis, kaj la duone vidataj pintoj de la okcidentaj montoj estis kronitaj de steloj, sed la oriento estis malluma kaj senforma. La etendiĝantaj ŝtonoj malrapide velkis el la vidkampo, sed preter ili, pli nigra ol la malhelo, brovumis la larĝa kaŭra ombro de Dvimorbergo.

— La Padoj de l' Mortintoj, — li murmuris al si. — ĉu la padoj de l' Mortintoj? Kion signifas ĉio ĉi? Ili jam ĉiuj forlasis min. Ili ĉiuj iris al iu sorto: Gandalfo kaj Grinĉjo al nulito en la oriento; Sam kaj Frodo al Mordoro; Paŝegulo, Legolaso kaj Gimlio al la Padoj de l' Mortintoj. Sed mia vico venos sufiĉe baldaŭ supozeble. Mi scivolas, pri kio ili ĉiuj parolas, kaj kion la reĝo intencas fari. Ĉar mi jam devos iri, kien li iras. Meze de tiuj malgajaj pensoj, li subite rememoris, ke li tre malsatas, kaj li stariĝis por iri vidi, ĉu iu alia en tiu stranga tendaro sentis same. Sed ĝuste tiumomente sonoris trumpeto, kaj viro venis alvoki lin, la eskviron de la reĝo, por deĵori ĉe la reĝa tablo.

En la interna parto de la pavilono estis eta spaco, kurtenita per broditaj tolpendaĵoj kaj kun feloj dismetitaj; kaj tie ĉe tableto sidis Teodeno kun Eomero kaj Eovina, kaj Dunhero estro de Harvalo. Gaja staris malantaŭ la reĝa tabureto kaj servis lin, ĝis baldaŭ la maljunulo, elpensiĝante, turniĝis al li kaj ridetis.

— Venu, sinjoro Gajadoko! — li diris. — Ne staru. Sidiĝu apud mi, tiel longe kiel mi restas sur mia propra tereno, kaj malpezigu mian koron per rakontoj.

Oni liberigis lokon por la hobito maldekstre de la reĝo, sed neniu petis rakonton. Efektive oni malmulte parolis, kaj oni manĝis kaj trinkis plejparte silente, ĝis finfine, trovinte kuraĝon, Gaja starigis la demandon, kiu turmentis lin.

— Dufoje jam, mastro, mi aŭdis pri la Padoj de l' Mortintoj, — li diris. — Kio ili estas? Kaj kien iris Paŝegulo, nome mastro Aragorno, kien li iris?

La reĝo suspiris, sed neniu respondis, ĝis finfine Eomero ekparolis:

— Ni ne scias, kaj pezas niaj koroj. Sed rilate la Padojn de l' Mortintoj, vi mem surpaŝis ties unuajn ŝtupojn. Ne, neniujn vortojn misfortunajn mi

parolas! Tiu vojo, kiun ni grimpis, estas aliro al la Pordo, tie en Dimholto. Sed kio kuŝas post ĝi, tion scias neniu.

— Scias neniu, — diris Teodeno, — tamen pralegendo, nuntempe apenaŭ menciata, raportas ion. Se parolas vere tiuj malnovaj historioj, kiuj pasadis de patro al filo en la Domo de Eorlo, la Pordo sub Dvimorbergo kondukas al sekreta vojo, kiu iras sub la monto al iu forgesita loko. Sed neniu iam ajn aŭdacis eniri por serĉi ties sekretojn, de kiam Baldoro, filo de Brego, trapasis la Pordon kaj neniam plu estis vidita inter la homoj. Malprudentan voton li prononcis, eltrinkinte kornon ĉe tiu festo, kiun starigis Brego por sanktigi nove konstruitan Meduseldon, kaj li neniam venis al tiu alta seĝo, kies heredanto li estis. Oni diras, ke Mortintoj el la Mallumaj Jaroj gardas la vojon kaj permesas al neniu vivanto aliron al siaj kaŝitaj haloj; sed de tempo al tempo ili mem videblas trapasante ombrece la pordon kaj irante laŭ la ŝtonvojo. Tiam la homoj en Harvalo firme fermas siajn pordojn kaj kovras siajn fenestrojn kaj timas. Sed malofte la Mortintoj elvenas, nur en horoj de granda maltrankvilo kaj proksimiĝanta morto.

— Tamen oni diras en Harvalo, — diris Eovina mallaŭte, — ke dum la senlunaj noktoj antaŭ ne tre longe amaso tre strange vestita preterpasis. De kie ili venis, sciis neniu, sed ili laŭiris la ŝtonvojon kaj malaperis en la monton, kvazaŭ ili irus al rendevuo.

— Do kial Aragorno iris tiun vojon? — demandis Gaja. — Ĉu vi scias ion, kio klarigus tion?

— Krom se li diris ion al vi kiel al sia amiko, kion ni ne aŭdis, — diris Eomero, — nun neniu en la lando de la vivantoj povas diveni lian intencon.

— Ege ŝanĝita li ŝajnis al mi, post kiam mi la unuan fojon vidis lin en la reĝa domo, — diris Eovina, — pli serioza, pli maljuna. Envultita mi taksis lin, kaj simila al iu vokata de la Mortintoj.

— Eble li estis vokata, — diris Teodeno, — kaj mia koro diras al mi, ke mi neniam plu vidos lin. Tamen li estas reĝeca persono, alte destinita. Kaj konsoliĝu per tio, filino, tiel ke konsolon vi ŝajne bezonas pro via doloro pri tiu gasto. Oni diras, ke kiam la eorlidoj venis el la nordo kaj pasis finfine supren laŭ Neĝburno, serĉante sekurajn rifuĝejojn en tempo premanta, Brego kaj ties filo Baldoro supreniris la Ŝtuparon de la Fortikaĵo kaj tiel staris antaŭ la Pordo. Ĉe la sojlo sidis oldulo, nediveneble maljunega, alta kaj reĝeca li antaŭe estis, sed nun li estis velkinta kiel malnova ŝtono. Efektive ŝtono ili supozis lin, ĉar li tute ne moviĝis kaj diris neniun vorton, ĝis ili celis preterpasi lin kaj eniri. Kaj tiam voĉo eliĝis el li, kvazaŭ el la tero, kaj surprize al ili ĝi parolis en la okcidenta lingvo: *La vojo estas fermita*.

» Tiam ili haltis kaj rigardis lin kaj vidis, ke li vivas ankoraŭ; sed li ilin

ne rigardis. *La vojo estas fermita*, lia voĉo diris denove. *Ĝin kreis tiuj, kiuj estas Mortintaj, kaj la Mortintoj gardas ĝin, ĝis venos la okazo. La vojo estas fermita*.

» *Kaj kiam la okazo venos*? demandis Baldoro. Sed neniun respondon li ricevis. Ĉar la maljunulo mortis tiuhore kaj falis survizaĝen; kaj neniun pluan informon pri la praloĝantoj de la montaro nia popolo iam eksciis. Tamen eble finfine la epoko aŭgurita jam venis, kaj Aragorno eble trapasos.

— Sed kiel oni konstatu, ĉu aŭ ne tiu epoko venis, krom riskante la Pordon? — demandis Eomero. — Kaj tiun vojon mi ne irus eĉ se ĉiuj hordoj de Mordoro starus antaŭ mi, kaj mi estus sola kaj havus neniun alian rifuĝejon. Ve, ke humoro tiel envulta trafis viron tiel grandkoran en tiu ĉi horo de bezono! Ĉu ne estas sufiĉe da misaj aferoj en la mondo, sen ke oni serĉu ilin sub la tero? Milito proksimas.

Li paŭzis, ĉar tiumomente aŭdiĝis bruo ekstere, vira voĉo krianta la nomon de Teodeno, kaj la kiu-iras de la sentinelo.

Baldaŭ la estro de l' sentineloj flankenŝovis la kurtenon kaj diris:

— Mastro, venis komisiito el Gondoro. Li volas tuj veni al vi.

— Li venu! — diris Teodeno.

Eniris altulo, kaj Gaja sufokis ekkrion; ĉar ŝajnis al li, ke Boromiro denove vivas kaj revenis. Poste li konstatis, ke tiel ne estas; la viro estis nekonata, kvankam tiel simila al Boromiro, ke li ŝajnis parenca, alta, grizokula kaj fiera. Li estis vestita rajdiste per mantelo el malhela verdo super delikata maŝkitelo; sur la antaŭo de lia kasko estis verkita arĝenta steleto. En la mano li portis unu sagon, nigrapluman kaj ŝtalpintan, sed la pinto estis ruĝe farbita.

Li unukrure genuiĝis kaj transdonis la sagon al Teodeno.

— Saluton, Mastro de la rohananoj, amiko de Gondoro! Mi estas Hirgono, komisiito de Denetoro, kiu alportas al vi ĉi tiun militsignon. Gondoro estas en grava danĝero. Ofte la rohananoj helpis nin, sed nun la Mastro Denetoro petas vian tutan forton kaj vian tutan rapidecon, ĉar eble Gondoro finfine detruiĝos.

— La Ruĝa Sago! — diris Teodeno, tenante ĝin kvazaŭ li ricevus alvokon longe atenditan, tamen teruran, kiam ĝi venas. Lia mano tremis. — La Ruĝa Sago ne estas vidita en Markio dum ĉiuj miaj jaroj! Ĉu vere ni venis ĝis tio? Kaj kiom supozas Mastro Denetoro mian tutan forton kaj mian tutan rapidecon?

— Tion plej bone scias vi, mastro, — diris Hirgono. — Sed post nelonge povos okazi, ke Minaso Tirit estos ĉirkaŭbarita, kaj se vi ne estas sufiĉe forta por trabreĉi sieĝon multpotencan, Mastro Denetoro ordonis al mi diri, ke laŭ lia prijuĝo la fortaj armiloj de la rohananoj pli utilos interne

de liaj muroj ol ekstere.

— Sed li scias, ke nia popolo batalas prefere surĉevale kaj en malfermiteco, kaj ankaŭ ke ni estas popolo disloĝanta kaj necesas tempo por kunigi niajn rajdistojn. Ĉu ne vere estas, Hirgono, ke la Mastro de Minaso Tirit scias pli, ol li inkluzivas en sia mesaĝo? Ĉar ni jam militas, kiel vi eble vidis, kaj vi ne trovas nin tute senpreparaj. Gandalfo la Griza estis inter ni, kaj ĝuste nun ni kuniĝas por batalo en la oriento.

— Kion Mastro Denetoro eble scias aŭ konjektas, mi ne povas diri, — respondis Hirgono. — Sed efektive nia situacio estas danĝerega. Mia Mastro ne sendas al vi iun ordonon, li nur petas, ke vi memoru la malnovan amikecon kaj votojn delonge diritajn, kaj por via propra prospero faru vian plejeblon. Estas raportite al ni, ke multaj reĝoj alrajdis el la oriento por servi al Mordoro. De la nordo ĝis la kampo de Dagorlado estas interbatiĝo kaj onidiroj pri milito. En la sudo haradanoj moviĝas, kaj timo inundis niajn marbordojn, tiel ke malmulte da helpo venos al ni de tie. Rapidu! Ĉar ĝuste antaŭ la muroj de Minaso Tirit la sorto de nia epoko estos decidita, kaj se la tajdo ne estos haltigita tie, poste ĝi trafluos ĉiujn belajn kampojn de Rohano, kaj eĉ en tiu ĉi Fortikaĵo inter la montetoj ne estos rifuĝejo.

— Mallumaj sciigoj, — diris Teodeno, — tamen ne tute nesupozitaj. Sed diru al Denetoro, ke eĉ se Rohano mem ne sentus danĝeron, ni tamen venus helpi lin. Sed nin trafis multaj perdoj en niaj bataloj kontraŭ la perfidulo Sarumano, kaj ni devas plu konsideri nian landlimon norde kaj oriente, kiel vidigas liaj propraj informoj. La granda potenco, kiun la Malluma Mastro nun ŝajnas disponi, eble povus haltigi nin en batalo antaŭ la urbo kaj tamen frapi grandforte trans la Riveron fore preter la Reĝa Pordo.

» Sed ni ne plu parolos, kiel konsilas la prudento. Ni venos. La apelo estas aranĝita por morgaŭ. Kiam ĉio estos ordigita, ni ekvojaĝos. Dek mil lancistojn mi eble povintus rajdigi tra la ebenaĵo por konsterni viajn malamikojn. Sed estos malpli multe, bedaŭrinde, ĉar mi ne volas lasi negarditaj miajn fortikaĵojn. Tamen almenaŭ ses mil rajdos post mi. Diru al Denetoro, ke ĉi-hore la Reĝo de Markio mem descendos al la lando Gondoro, kvankam eble li ne rajdos returnen. Sed ĝi estas vojo longa, kaj homoj kaj bestoj devos alveni la finon kun forto por la batalo. Eble pasos semajno ekde la morgaŭa mateno antaŭ ol vi aŭdos kriegon de la filoj de Eorlo proksimiĝanta el la nordo.

— Ĉu semajno! — diris Hirgono. — Se tiel devas esti, tiel estu. Sed vi probable trovos nur murojn ruinigitajn je sep tagoj de la nuno, krom se venos neatendite alia helpo. Nu, vi povos almenaŭ perturbi la orkojn kaj la brunhaŭtulojn, dum tiuj festos en la Blanka Turego.

— Ni faros almenaŭ tion, — diris Teodeno. — Sed mi mem ĵus venis el batalo kaj longa vojaĝo, kaj mi iros nun ripozi. Restu ĉi tie ĉi-nokte. Poste vi rigardos la apelon de Rohano kaj forrajdos tiom pli ĝoja pro la vido, kaj pli rapide pro la ripozo. Konsiliĝoj plej trafas matene, kaj nokto ŝanĝas multajn aferojn.

Tion dirinte la reĝo stariĝis, kaj ĉiuj stariĝis.

— Iru nun ĉiu al sia ripozo, — li diris, — kaj dormu bone. Kaj vin, sinjoro Gajadoko, mi ne plu bezonas hodiaŭ nokte. Sed estu preta por mia alvoko tiel baldaŭ kiel la suno leviĝos.

— Mi estos preta, — diris Gaja, — eĉ se vi ordonos, ke mi rajdu kun vi laŭ la Padoj de l' Mortintoj.

— Ne parolu la vortojn aŭgurajn! — diris la reĝo. — Ĉar eble ekzistas pli ol unu vojo meritanta tiun nomon. Sed mi ne diris, ke mi ordonos al vi rajdi kun mi laŭ iu ajn vojo. Bonan nokton!

— Mi rifuzas postlasiĝi, ke oni retrovu min revenante! — diris Gaja. — Mi rifuzas postlasiĝi, mi rifuzas. — Kaj tion ripetante ĉiam denove al si, li finfine ekdormis en sia tendo.

Lin vekis homo, skuanta lin.

— Vekiĝu, vekiĝu, sinjoro Holbitlo! — kriis tiu, kaj finfine Gaja vekiĝis el profunda sonĝo kaj sidiĝis tikante. Ankoraŭ ŝajnas tre malhele, li pensis.

— Kio okazas? — li demandis.

— La reĝo vin alvokas.

— Sed la suno ankoraŭ ne leviĝis.

— Ne, kaj ne leviĝos hodiaŭ, sinjoro Holbitlo. Nek iam plu, oni supozus sub jena nubo. Sed la tempo ne senmoviĝas, eĉ se la suno estas perdita. Rapidu!

Surmetinte kelkajn vestojn Gaja rigardis eksteren. La mondo estis malheleca. La aero mem ŝajnis bruna, kaj ĉio ĉirkaŭe estis nigra kaj griza kaj senombra. Regis plena senmoveco. Neniu nubo videblis, krom eble fore en la okcidento, kie la plej malproksimaj palpantaj fingroj de la granda morno plu rampis antaŭen kaj trapenetris ilin iom da lumo. Supre pendis peza tegmento, sombra kaj senforma, kaj la lumo ŝajnis velki pli ol kreski.

Gaja vidis multajn personojn starantajn, suprenrigardantajn kaj murmurantajn; ĉies vizaĝoj estis grizaj kaj malĝojaj, kaj iuj timis. Kun peziĝanta koro li sin direktis al la reĝo. La gondora rajdisto Hirgono anticipis lin, kaj apud tiu nun staris alia viro simila al li kaj same vestita, sed pli malalta kaj pli larĝa. Kiam Gaja eniris, tiu alparolis la reĝon.

— Ĝi venas el Mordoro, moŝto, — li diris. — Ĝi komenciĝis hieraŭ vespere je sunsubiro. El la montoj de Eostfaldo en via regno mi vidis ĝin leviĝi kaj trarampi la ĉielon, kaj tutnokte, dum mi rajdis, ĝi venis malantaŭe

glutante la stelojn. Jam la nubego superombras la tutan teron inter ĉi tie kaj la Ombraj Montoj, kaj ĝi pliprofundiĝas. Milito jam komenciĝis.

Dum iom da tempo la reĝo sidis silenta. Fine li ekparolis:

— Do ni alvenas ĝin en la fino, la grandan batalon de nia epoko, en kiu forpasos multaj aferoj. Sed almenaŭ ne plu necesas kaŝiĝo. Ni rajdos laŭ la rekta kaj senŝirma vojo kaj per tuta nia rapido. La apelo komenciĝos jam tuj, kaj atendos neniun malfruanton. Ĉu en Minaso Tirit vi havas sufiĉe da provianto? Ĉar se ni devos nun rajdi plej haste, ni sekve devos rajdi senŝarĝe, kun nur sufiĉe da greno kaj akvo por nutri nin ĝisbatale.

— Ni havas grandan stokon jam longe preparitan, — respondis Hirgono. — Rajdu nun laŭeble senŝarĝe kaj rapide!

— Do alvoku la heroldojn, Eomero, — diris Teodeno. — La rajdistoj estu envicigitaj!

Eomero eliris, kaj baldaŭ la trumpetoj sonoris en la Fortikaĵo kaj ilin respondis multaj malsupre; sed ties voĉoj ne plu sonis klare kaj brave, kiel ili ŝajnis al Gaja la antaŭan vesperon. Obtuzaj ili ŝajnis kaj aspraj en la peza aero, henante sinistre.

La reĝo sin turnis al Gaja.

— Mi iras al milito, sinjoro Gajadoko, — li diris. — Tre baldaŭ mi ekvojaĝos. Mi liberigas vin el mia servado, sed ne el mia amikeco. Vi restos ĉi tie kaj, se vi volos, vi servos Damon Eovina, kiu regos la popolon anstataŭ mi.

— Sed, sed, mastro, — Gaja balbutis, — mi proponis al vi mian glavon. Mi ne volas esti disigita de vi, reĝo Teodeno. Kaj pro tio, ke ĉiuj miaj amikoj iris al la batalo, mi hontus resti malantaŭe.

— Sed ni rajdos sur ĉevaloj altaj kaj rapidaj, — diris Teodeno, — kaj malgraŭ tio, ke via koro estas granda, vi ne povos rajdi tiajn bestojn.

— Do ligu min al ies dorso, aŭ permesu al mi kroĉiĝi al ies piedingo, aŭ io. Estas longa vojo por kuranto, sed mi ja kuros, se mi ne povos rajdi, eĉ se mi fortrivos miajn piedojn kaj alvenos semajnojn tro malfrue.

Teodeno ridetis.

— Prefere ol tio, mi kunportus vin sur Neĝkolaĵo, — li diris. — Sed vi almenaŭ rajdos kun mi ĝis Edoraso kaj rigardos al Meduseldo, ĉar tien mi iros. Ĝis tie povos vin porti Stibo: la granda vetkuro ne komenciĝos ĝis ni atingos la ebenaĵon.

Tiam Eovina stariĝis.

— Venu jam, Gajadoko! — ŝi diris. — Mi montros al vi la ekipaĵon, kiun mi preparis por vi. — Ili eliris kune. — Nur tiun ĉi peton starigis al mi Aragorno, — diris Eovina, dum ili trapasis inter la tendoj, — ke vi estu armita por la batalo. Tion mi konsentis laŭ miaj eblecoj. Ĉar mia koro diras

al mi, ke vi bezonos tian ekipaĵon antaŭ la fino.

Ŝi kondukis Gajan al budo inter la loĝejoj de la reĝa gardistaro; kaj tie armilisto portis al ŝi malgrandan kaskon, rondan ŝildon kaj aliajn armaĵojn.

— Neniun maŝkirason ni havas, kiu povus adaptiĝi al vi, — diris Eovina, — nek tempon por forĝi tian maŝkirason; sed jen estas dika brustvesto el ledo, zono kaj ponardo. Glavon vi jam havas.

Gaja riverencis, kaj la damo montris al li la ŝildon, kiu similis la ŝildon donitan al Gimlio, kaj ĝi surhavis la insignon de la blanka ĉevalo.

— Prenu ĉion ĉi, — ŝi diris, — kaj portu ilin al bonfortuno! Adiaŭ jam, sinjoro Gajadoko! Ni eble tamen renkontiĝos denove, vi kaj mi.

Tiel okazis, ke en profundiĝanta sombro la Reĝo de Markio prepariĝis por konduki ĉiujn siajn rajdistojn laŭ la orienta vojo. Koroj pezis, kaj multaj timis en la ombro. Sed ili estis popolo severa, lojala al sia mastro, kaj malmulte da plorado aŭ murmurado aŭdiĝis, eĉ en la tendaro en la Fortikaĵo, kie loĝis la ekzilitoj el Edoraso, virinoj, infanoj kaj gemaljunuloj. Missorto ŝvebis super ili, sed ili frontis ĝin silente.

Pasis du rapidaj horoj, kaj nun la reĝo sidis sur sia blanka ĉevalo, ekbrilanta en la duonlumo. Fiera kaj alta li ŝajnis, malgraŭ tio, ke la haroj fluantaj sub lia alta kasko similis la neĝon; kaj multaj rigardis lin mire kaj kuraĝiĝis vidante lin malkliniĝa kaj sentima.

Tie sur la larĝaj ebenaĵoj apud la brua rivero estis ordigitaj en multaj trupoj preskaŭ kvincent kvin centoj da rajdistoj plenarmitaj, kaj pluraj centoj da aliuloj kun rezervaj ĉevaloj malpeze ŝarĝitaj. Unuopa trumpeto sonoris. La reĝo levis sian manon, kaj tiam silente la armeo da markianoj ekiris. Unue iris dek du domanoj de la reĝo, renomaj rajdistoj. Poste sekvis la reĝo kun Eomero dekstre. Li jam adiaŭis al Eovina supre en la Fortikaĵo, kaj tiu memoro estis malĝojiga; sed nun li turnis sian atenton al la vojo antaŭe. Malantaŭ li Gaja rajdis sur Stibo kun la mesaĝistoj de Gondoro, kaj pli malantaŭe alia dekduo de reĝaj domanoj. Ili preterpasis la longajn vicojn da atendantoj kun severaj kaj senemociaj vizaĝoj. Sed kiam ili preskaŭ alvenis la ekstremon de la vicoj, iu direktis rigardon akran al la hobito. Junulo, pensis Gaja reciproke rigardante, malpli alta kaj fortika ol la plimulto. Li konstatis ekbrilon de klaraj grizaj okuloj; kaj tiam li ektremetis, ĉar subite venis al li en la kapon, ke tio estas vizaĝo de persono senespera, kiu iras serĉi la morton.

Plu laŭ la griza vojo ili iris apud Neĝburno hastanta sur siaj ŝtonoj; tra la vilaĝetoj Subharo kaj Supraburno, kie multaj malgajaj virinaj vizaĝoj rigardis tra malhelaj pordejoj; kaj tiel sen korno aŭ harpo aŭ virvoĉa muziko la granda rajdado orienten komenciĝis, pri kiu okupiĝis la kantoj de Rohano dum multaj longaj homvivoj poste.

El Dunharo en morna mateno
rajdis kun komandantoj fil’ de Tengelo:
venis al Edoraso, l’ antikvaj haloj
de l’ limgardantoj nebulumitaj;
orajn trabojn malhelo mantelis.
Li adiaŭis liberan popolon,
la tronon, fajrujojn, kaj lokojn sanktajn,
kie festadis li antaŭ krepusko.
Elrajdis la reĝo, tim’ malantaŭe,
fato antaŭe. Li lojaladis
al votoj faritaj, ilin plenumis.
Teodeno elrajdis. Kvin noktojn kaj tagojn
al oriento rajdis eorlidoj
tra Foldo, Fenmarĉo kaj Firenarbaro,
ses mil lancoj al Sunlendingo,
Mundburgo potenca sub Mindoluino,
mar-reĝa urbo en suda reĝlando
sieĝata, fajr-ĉirkaŭita.
Sort’ ilin pelis. Glutis mallumo
ĉevalojn kaj homojn; hufbatoj fore
sinkis silenten: rakontas la kantoj.

Efektive en profundiĝanta malhelo venis la reĝo al Edoraso, kvankam temis nur pri tagmezo laŭhorloĝe. Tie li haltis nur mallonge kaj plifortigis sian armeon per ĉirkaŭ sesdeko da rajdistoj venintaj malfrue al la apelo. Nun manĝinte li pretigis sin denove por ekvojaĝi, kaj li afable adiaŭis sian eskviron. Sed Gaja lastfoje petegis, ke li ne estu apartigita.

— Jen ne estas vojaĝo por tiaj rajdbestoj kiaj Stibo, mi jam diris al vi, — diris Teodeno. — Kaj en tia batalo, kian ni intencas fari sur la kampoj de Gondoro, kion vi farus, sinjoro Gajadoko, kvankam vi estas glavmajstro kun pli da koro ol da staturo.

— Tiurilate kiu povas antaŭvidi? — respondis Gaja. — Sed kial, mastro, vi ricevis min kiel glavmajstron, se ne por resti ĉe via flanko? Kaj mi ne volas, ke oni dira pri mi en kantoj, ke mi ĉiam estis postlasita!

— Mi ricevis vin por sekurigi vin, — respondis Teodeno, — kaj ankaŭ por ke vi faru laŭ miaj eventualaj ordonoj. Neniu el miaj rajdistoj povos porti vin kiel ŝarĝon. Se la batalo okazus antaŭ miaj pordoj, eble viajn farojn rememorus la menestreloj, sed estas cent du leŭgoj ĝis Mundburgo, kie Denetoro regas. Pli mi ne diros.

Gaja riverencis kaj foriris malĝoje, kaj gapis al la vicoj da rajdistoj. Jam la trupoj estis pretiĝantaj por ekiro: viroj striktigis selzonojn, prizorgis la

selojn, karesis siajn ĉevalojn; iuj maltrankvile rigardis la premantan ĉielon. Nerimarkite alvenis rajdisto kaj alparolis mallaŭte en la orelon de la hobito.

— *Kie emo ne mankas, liberiĝas vojo*, tiel ni diras, — li flustris; — kaj tion mi mem konstatis. — Gaja suprenrigardis kaj vidis, ke tiu estas la juna rajdisto, kiun li matene rimarkis. — Vi volas iri tien, kien iras la Mastro de Markio: mi vidas tion en via vizaĝesprimo.

— Vere, — diris Gaja.

— Do vi akompanos min, — diris la rajdisto. — Mi kunportos vin antaŭ mi, sub mia mantelo ĝis ni estos en malproksimo kaj jena mallumo pli mallumos. Tian bonvolon oni ne rifuzu. Nenion plu diru al iu ajn, sed venu!

— Mi vere tre dankas! — diris Gaja. — Dankon, sinjoro, kvankam vian nomon mi ne scias.

— Ĉu ne? — diris la rajdisto mallaŭte. — Do nomu min Dernkasko.

Tiel okazis, ke kiam la reĝo ekvojaĝis, antaŭ Dernkasko sidis la hobito Gajadoko, kaj la griza ĉevalego Ventfola malzorgis pri la ŝarĝo; ĉar Dernkasko malpli pezis ol multaj viroj, kvankam li estis supla kaj forme fortikeca.

Antaŭen en la ombron ili rajdis. En la salikaj densejoj, kie Neĝburno fluis en Entvaŝon, je dek du leŭgoj oriente de Edoraso, oni bivakis tiunokte. Kaj poste antaŭen denove tra Foldo; kaj tra Fenmarĉo, kie dekstre grimpis grandaj kverkejoj sur la montflankoj sub la ombroj de malhela Halifirieno apud la limoj de Gondoro; sed fore maldekstre nebuletoj surkuŝis la marĉojn kreitajn de la elfluejoj de Entvaŝo. Kaj dum ili rajdis, venis onidiroj pri milito en la nordo. Unuopuloj, sovaĝe rajdante, alportis sciigojn pri malamikoj atakantaj ilian orientan limon, pri orkamasoj marŝantaj en la steparo de Rohano.

— Rajdu plu! Rajdu plu! — kriis Eomero. — Tro malfrue jam por flankeniri. La marĉejoj de Entvaŝo devos gardi nian flankon. Nun rapidon ni bezonas. Rajdu plu!

Kaj tiel Reĝo Teodeno foriris el sia regno, kaj leŭgon post leŭgo la longa vojo forserpentumis, kaj la signalfajraj montetoj pretermarŝis: Kalenhado, Min-Rimono, Erelaso, Nardolo. Sed ties fajroj estis estingitaj. La tuta tereno estis griza kaj senmova; kaj ĉiam pli da ombro profundiĝis antaŭ ili, kaj espero malkreskis en ĉiu koro.

4

La sieĝo de Gondoro

Grinĉjo estis vekita de Gandalfo. Kandeloj estis fajrigitaj en ilia ĉambro, ĉar tra la fenestroj venis nur malforta krepusko; la aero pezis kvazaŭ pro proksimiĝanta tondro.

— Kioma horo estas? — diris Grinĉjo oscedante.

— Post la dua horo, — diris Gandalfo. — Jam estas tempo ellitiĝi kaj ordigi vin. Vi estas vokita al la Mastro de la Urbo por ekscii viajn novajn devojn.

— Kaj ĉu li havigos matenmanĝon?

— Ne! Ĝin mi havigis: ĉion kion vi ricevos ĝis la tagmezo. Manĝaĵoj estas nun porciumataj laŭordone.

Grinĉjo rigardis malgaje la malgrandan panon kaj (laŭ lia opinio) tre nesufiĉan buterpecon, kiuj estis elmetitaj por li apud taso da maldensa lakto.

— Kial vi kondukis min ĉi tien? — li diris.

— Vi tre bone scias, — diris Gandalfo. — Por disigi vin de malutilo; kaj se ne plaĉas al vi esti ĉi tie, vi rajtas memori, ke vi tion mem trudis al vi.

Grinĉjo diris nenion plu.

Post nelonge li marŝis kun Gandalfo denove tra la malvarma koridoro al la pordo de la Turega Halo. Tie Denetoro sidis en griza sombro, kvazaŭ maljuna pacienca araneo, Grinĉjo pensis; li ŝajnis ne esti moviĝinta ekde la antaŭa tago. Li fingrovokis Gandalfon al seĝo, sed Grinĉjo daŭre staris dum kelka tempo malatentite. Fine la maljunulo turnis sin al li:

— Nu, sinjoro Peregrino, espereble vi utiligis hieraŭon por via profito, kaj agrable por vi? Tamen mi timas, ke la tablo en tiu ĉi urbo estas malpli ŝarĝita ol laŭ via deziro.

Grinĉjo sentis iom senkomforte, ke la plimulto de tio, kion li diris aŭ faris, estas iel konata al la Mastro de la Urbo, kaj cetere multo el tio, kion li pensis. Li nenion respondis.

— Kaj kion vi volas fari en mia servado?

— Mi supozis, mastro, ke vi difinos al mi miajn devojn.

— Tion mi faros, kiam mi ekscios por kio vi taŭgas, — diris Denetoro. — Sed tion mi ekscios plej frue, eble, se mi tenos vin apud mi. La eskviro de mia ĉambro petis permeson iri al la ekstera garnizono, do vi anstataŭos lin dum iom da tempo. Vi servos min, portos mesaĝojn, kaj parolos al mi, se la milito kaj konsiliĝo lasos al mi senokupan tempon. Ĉu vi scias kanti?

— Jes, — diris Grinĉjo. — Nu, jes, sufiĉe bone por mia propra popolo. Sed ni ne havas kantojn taŭgajn en halegoj kaj misepokoj, moŝto. Ni malofte kantas pri io pli terura ol vento aŭ pluvo. Kaj la plimultaj miaj kantoj temas pri aferoj, kiuj ridigas min; aŭ pri manĝado kaj trinkado, kompreneble.

— Kaj kial tiaj kantoj ne estu taŭgaj en miaj haloj, aŭ dum tiaj horoj kiaj la nunaj? ĉu ni, kiuj vivis longe sub la Ombro, supozeble rajtas aŭskulti eĥojn el lando neĝenata de ĝi? Tiam ni povos senti, ke ne senfrukta estis nia maldormo, kvankam ĝi eble estis sendanka.

Grinĉjo deprimiĝis. Al li ne plaĉis la ideo kanti iun kanton el la Provinco al la Mastro de Minaso Tirit, certe ne la komikajn, kiujn li plej bone konis; tiuj estus tro, nu, kamparanecaj por tia okazo. Li estis tamen provizore liberigita de la turmento. Oni ne ordonis, ke li kantu. Denetoro turnis sin al Gandalfo, starigante demandojn pri la rohananoj kaj ties politiko kaj la situacio de Eomero, nevo de la reĝo. Grinĉjo miris pri kiom la Mastro verŝajne sciis pri popolo loĝanta tiel fore, kvankam certe, li pensis, pasis multaj jaroj post kiam Denetoro mem rajdis eksteren.

Baldaŭ Denetoro gestis al Grinĉjo kaj provizore forsendis lin.

— Iru al la armilejo de la Citadelo, — li diris, — kaj akiru tie la livreon kaj ekipaĵon de la Turego. Ĝi estos preta. Ĝi estis mendita hieraŭ. Revenu kiam vi estos vestita!

Okazis laŭ lia diro; kaj Grinĉjo baldaŭ trovis sin vestita per strangaj vestaĵoj, ĉiuj el nigro kaj arĝento. Li havis etan maŝkirason, kies ringoj estis forĝitaj el ŝtalo, eble, tamen gagate nigraj; kaj altvertan kaskon kun etaj korvflugiloj ambaŭflanke, inkrustitan per arĝenta stelo en la mezo de la cirkleto. Super la maŝo estis mallonga nigra kitelo, arĝente brodita en la centro je la emblemo de la Arbo. Liaj malnovaj vestoj estis falditaj kaj metitaj en tirkeston; al li estis permesate reteni nur la grizan mantelon de Lorieno, sed ne porti ĝin dumdeĵore. Li aspektis jam, se li nur scius tion, kiel vera *Ernil i Pheriannath*, la Princo de la Duonuloj, kiel la homoj nomis lin; sed li sentis sin nekomforta. Kaj la malhelo komencis deprimi lian spiriton.

Estis malhele kaj krepuske dum la tuta tago. Ekde la sensuna tagiĝo ĝis la vespero la peza ombro profundiĝis, kaj ĉiuj koroj en la Urbo estis deprimitaj. Altsupre granda nubo moviĝis malrapide okcidenten el la Nigra Lando, vorante la lumon, portate sur vento de milito; sed sube la aero estis senmova kaj senspira, kvazaŭ la tuta valo de Anduino atendus la atakon de ruiniga ŝtormo.

Ĉirkaŭ la dek-unua horo, liberigite finfine de deĵorado dum iom da tempo, Grinĉjo elvenis kaj iris serĉi manĝaĵon kaj trinkaĵon por gajigi sian

pezan koron kaj igi pli subtenebla sian atendotaskon. En la manĝejo li renkontis denove Beregondon, kiu ĵus revenis post komisio trans Pelenoro al la gardoturoj sur la ĉefvojo. Kune ili elpromenis al la muroj; ĉar interne Grinĉjo sentis sin enkarcerigita, kaj sufokita eĉ en la altplafona citadelo. Nun ili sidis flankalflanke denove en la niĉo frontanta orienten, kie la antaŭan tagon ili manĝis kaj interparolis.

Estis la sunsubira horo, sed la granda vualo jam etendiĝis foren al la okcidento, kaj nur kiam ĝi sinkis fine en la maron la suno eskapis por elsendi mallongan adiaŭan ekbrilon antaŭ la nokto, samkiel Frodo vidis ĝin ĉe la Krucvojo tuŝanta la kapon de l' falinta reĝo. Sed al la kampoj de Pelenoro, sub la ombro de Mindoluino, venis neniu ekbrilo: ili estis brunaj kaj mornaj.

Jam ŝajnis al Grinĉjo, ke pasis jaroj post kiam li sidis tie antaŭe, en iu duonforgesita tempo, kiam li ankoraŭ estis hobito, facilanima vaganto malmulte tuŝata de la trapasitaj danĝeroj. Nun li estis unuopa soldateto en urbo preparanta sin por granda atako, vestita en la fiera sed sombra maniero de la Garda Turego.

En aliaj tempo kaj loko eble plaĉus al Grinĉjo la nova vesto, sed li nun sciis, ke li ne partoprenas ludon; li estis tute serioze servisto de mastro severa en plej grava danĝero. La maŝkiraso estis peza ŝarĝo, kaj la kasko pezis sur lia kapo. La mantelon li flankenĵetis sur la sidlokon. Li forturnis siajn lacajn okulojn de la mallumaj kampoj sube kaj oscedis, kaj poste li suspiris.

— Vi laciĝis pri tiu ĉi tago, ĉu? — diris Beregondo.

— Jes, — diris Grinĉjo, — tre. Laciĝis pro neniofarado kaj atendado. Mi sentaskadis antaŭ la pordo de l' ĉambro de mia mastro dum multaj malrapidaj horoj, dum li debatis kun Gandalfo kaj la princo kaj aliaj eminentuloj. Kaj mi ne kutimas, mastro Beregondo, servadi malsata aliajn dum ili manĝas. Tio terure strečas hobiton. Sendube vi opinias, ke mi devus tiom pli konsciiĝi pri la honoro. Sed por kio taŭgas tia honoro? Efektive por kio taŭgas manĝaĵo kaj trinkaĵo sub tiu ĉi rampanta ombro? Kion ĝi signifas? La aero mem ŝajnas densa kaj bruna! ĉu vi ofte spertas tiajn mornojn kiam la vento venas el la oriento?

— Ne, — diris Beregondo, — tio ne estas vetero de la mondo. Tio estas elpensaĵo de lia malico, iu kirlaĵo de fumo el la Fajromonto, kiun li sendas por malheligi korojn kaj kapojn. Kaj tion ĝi ja faras. Mi volas, ke mastro Faramiro revenu. Lin tio ne malesperigus. Sed nun, kiu scias, ĉu li iam revenos trans la Riveron el la mallumo?

— Jes, — diris Grinĉjo, — ankaŭ Gandalfo maltrankviliĝas. Lin desapontis, ŝajnas al mi, ne trovi Faramiron ĉi tie. Kaj kien li mem iris? Li

forlasis la konsiliĝon ĉe la Reganto antaŭ la tagmeza manĝo, kaj cetere, ne bonhumora, laŭ mia opinio. Eble li antaŭscias pri malbona novaĵo.

Subite dum la interparolo ili mutiĝis, kvazaŭ glaciiĝintaj je aŭskultaj ŝtonoj. Grinĉjo kaŭris kun la manoj premitaj al siaj oreloj; sed Beregondo, kiu dumparole pri Faramiro elrigardis trans la remparon, restis tie rigidiĝante, gapante per la apertegaj okuloj. Grinĉjo rekonis la tremigan krion, kiun li aŭdis: ĝi estis tiu sama, kiun li antaŭlonge aŭdis en la Mariŝo de la Provinco, sed jam ĝi estis kreskinta potence kaj malamplene, trapikante la koron per venena malespero.

Fine Beregondo parolis penege:

— Ili jam venis! Ekkuraĝu kaj rigardu! Sube estas misegaĵoj. Malvolonte Grinĉjo grimpis sur la sidlokon kaj elrigardis trans la muron. Pelenoro kuŝis malklare sub li, forvelkante en la foron ĝis la apenaŭ divenebla linio de la Granda Rivero. Sed nun, girantajn rapide trans tiun, kvazaŭ ombrojn de mistempa nokto, li vidis sube en la meza aero grandajn birdsimilajn figurojn, hidajn kiel kadavromanĝuloj tamen pli grandajn ol agloj, tiel kruelajn kiel la morto. Jen ili alflugis proksimen, riskante preskaŭ pafdistance de la rauroj, jen ili forcirklis.

— Nigraj Rajdantoj! — murmuris Grinĉjo. — Nigraj Rajdantoj de la aero! Sed vidu, Beregondo! — li kriis. — Ili serĉas ion, ĉu ne? Vidu kiel ili giras kaj plonĝas, ĉiam direkte al iu punkto tie! Kaj ĉu vi vidas ion moviĝi sur la tero? Etaj malhelaĵoj. Jes, homoj sur ĉevaloj: kvar aŭ kvin. Ah! Mi ne toleras tion! Gandalfo! Gandalfo savu nin!

Alia longa kriĉo leviĝis kaj malleviĝis, kaj li retroĵetis sin denove disde la muro, anhelante kvazaŭ ĉasata besto. Li aŭdis veni de sube sonon de trumpeto, mallaŭtan kaj ŝajne foran en tiu vibra kriego, finiĝantan per longa alta noto.

— Faramiro! Mastro Faramiro! Jen lia signalo! — ekkriis Beregondo. — Brava koro! Sed kiel li atingu la Pordegon, se tiuj fiaj inferakcipitroj havas aliajn armilojn krom timo? Sed vidu! Ili eltenas. Ili alvenos la Pordegon. Ne! la ĉevaloj diskuras freneze. Vidu! la homoj estas elseligitaj; ili kuras surpiede. Ne, unu ankoraŭ surselas, sed li retrorajdas al la ceteraj. Tiu nepre estas la komandanto: li scias mastri tiel bestojn kiel homojn. Ha! jen unu el tiuj fiaĵoj plonĝas al li. Helpon! helpon! Ĉu neniu eliros al li? Faramiro!

Tion dirinte, Beregondo saltis for kaj kuris en la malhelon. Hontante pri sia teruriĝo, dum Beregondo pensis unuavice pri la amata komandanto, Grinĉjo supreniris kaj elgapis. Tiumomente li ekvidis ekbrilon de blanko kaj arĝento venanta el la nordo, kiel eta stelo suben al la krepuskaj kampoj. Ĝi moviĝis sagrapide kaj pligrandiĝis dum la veno, konverĝante rapide kun la

fuĝo de la kvar homoj al la Pordego. Ŝajnis al Grinĉjo, ke pala lumo disvastiĝas ĉirkaŭ ĝi, kaj la pezaj ombroj cedas antaŭ ĝi; kaj poste kiam ĝi proksimiĝis, li supozis aŭdi, kvazaŭ eĥon inter la muroj, vokadon de forta voĉo.

— Gandalfo! — li kriis. — Gandalfo! Li ĉiam aperas, kiam la aferoj plej mallumas. Antaŭen! Antaŭen, Blanka Rajdanto! Gandalfo! Gandalfo! — li kriis senrezerve, kiel spektanto ĉe grava vetkuro urĝanta kuranton, kiu estas ekster atingo de kuraĝigo.

Sed la malhelaj flugantaj ombroj konsciiĝis pri la nova veninto. Unu direktiĝis al li, sed ŝajnis al Grinĉjo, ke li levis sian manon, el kiu radio de blanka lumo pikis supren. La nazgulo eligis longan ululan krion kaj flankeniĝis; kaj post tio la kvar aliaj iom hezitis kaj, rapide spiralante supren, foriris orienten, malaperante en la minacan nubaron supre; kaj sube sur Pelenoro ŝajnis provizore pli hele.

Grinĉjo daŭre spektis, kaj li vidis la rajdiston kaj la Blankan Rajdanton renkontiĝi kaj halti, atendante la piedirantojn. Homoj jam rapidis al ili el la Urbo; kaj baldaŭ ĉiuj el la vido forpasis sub la eksteraj muroj, kaj li sciis, ke ili eniras la Pordegon. Konjektante ke ili tuj venos al la Turego kaj la Reganto, li rapidis al la citadela enirejo. Tie aliĝis al li multaj aliaj, kiuj spektis de la altaj muroj la vetkuron kaj la saviĝon.

Post nelonge aŭdiĝis bruego sur la stratoj kondukantaj supren de la eksteraj cirkloj, kaj okazis multe da huraado kaj kriado de la nomoj Faramiro kaj Mitrandiro. Baldaŭ Grinĉjo vidis torĉojn, kaj sekvataj de homamasoj du rajdistojn rajdantajn malrapide: unu estis blanka sed ne plu brila, pala en la krepusko kvazaŭ lia fajro estus estingita aŭ vualita; la alia estis malhela kaj lia kapo estis klinita. Ili elseliĝis, kaj dum ĉevalzorgantoj forkondukis Ombrofakson kaj la alian ĉevalon, ili marŝis antaŭen al la sentinelo ĉeporda: Gandalfo senŝancele, kun la griza mantelo retroŝovita kaj ardo daŭre subbrula en la okuloj; la alia, vestita tute en verdo, malrapide, iom ŝanceliĝe kiel homo laca aŭ vundita.

Grinĉjo premis sin antaŭen, kiam ili pasis sub la lampo malsupre de la porda arko, kaj vidante la palan vizaĝon de Faramiro li enspiris abrupte. Tio estis vizaĝo de iu, kiu estis atakita de granda timo aŭ turmentiĝo, sed jam estris ĝin kaj estis nun kvieta. Fiera kaj seriozega li staris, dum li alparolis la sentinelon, kaj Grinĉjo vidis, kiel proksime li similis sian fraton Boromiro, kiun ŝatis Grinĉjo dekomence, admirante la majestan sed bonkoran sintenon de la grandulo. Tamen subite pri Faramiro lia koro estis strange emociita pro sento, kiun li ne konis antaŭe. Jen estis iu kun tia mieno de alta nobleco, kian Aragorno kelkfoje vidigis, eble malpli alta, tamen ankaŭ malpli netaksebla kaj foreca: unu el la reĝoj de la homoj naskiĝinta pli malfrue, sed

tuŝita de la saĝo kaj malĝojo de la Pliaĝa Raso. Li nun sciis, Mal Beregondo elparolis ties nomon ameme. Li estis komandanto obeota de viroj, obeota ankaŭ de li, eĉ sub la ombro de la nigraj flugiloj.

— Faramiro! — li kriis laŭte kun la ceteraj. — Faramiro!

Kaj Faramiro, rimarkante lian fremdan voĉon en la bruado de la urbanoj, turniĝis kaj rigardis suben al li kaj estis mirigita.

— De kie vi venis? — li diris. — Duonulo, kaj en la livreo de la Turego! De kie?..

Sed tiumomente Gandalfo paŝis al lia flanko kaj parolis:

— Li venis kun mi el la lando de la duonuloj. Li venis kun mi. Sed ne prokrastu ĉi tie. Multo estas dirota kaj farota, kaj vi estas laca. Li akompanos nin. Fakte li devos tion fari, ĉar se li ne forgesas siajn novajn devojn pli facile ol mi, li devos ĉeesti sian mastron dum la nuna horo. Venu, Grinĉjo, sekvu nin!

Do fine ili atingis la privatan ĉambron de la Mastro de l' Urbo. Tie profundaj seĝoj estis metitaj ĉirkaŭ braĝujo; kaj vino estis alportita; kaj tie Grinĉjo, apenaŭ rimarkita, staris malantaŭ la seĝo de Denetoro kaj spertis malmulte sian lacon, ĉar li avide aŭskultis ĉion diratan.

Kiam Faramiro jam manĝis blankan panon kaj trinkis iomete da vino, li sidiĝis sur malalta seĝo maldekstre de sia patro. Iomete pli fore aliflanke sidis Gandalfo sur seĝo el ĉizita ligno; kaj komence li ŝajnis dormanta. Ĉar komence Faramiro parolis nur pri la komisio, pro kiu li estis elsendita antaŭ dek tagoj, kaj li alportis informojn pri Itilio kaj la movoj de la malamiko kaj ties aliancanoj; kaj li rakontis pri la batalo sur la vojo, kiam la haradanoj kaj ties granda besto estis venkitaj: komandanto raportanta al sia mastro tiajn aferojn, kiaj estis ofte aŭditaj pli frue, malgravaj aferetoj en limlanda milito, kiu jam ŝajnis senutila kaj bagatela, senigitaj de la renomo.

Tiam subite Faramiro rigardis al Grinĉjo kaj diris:

— Sed nun ni alvenas aferojn strangajn. Ĉar tiu ĉi ne estas la unua duonulo, kiun mi vidis marŝi el la nordaj legendoj en la Sudlandon.

Je tio Gandalfo rektiĝis kaj kaptis la apogilojn de sia seĝo; sed li diris nenion, kaj per rigardo mutigis la ekkrion sur la lipoj de Grinĉjo. Denetoro rigardis iliajn vizaĝojn kaj balancis la kapon, kvazaŭ signante ke li konstatis multon antaŭ ol io estis eldirita. Malrapide, dum la aliaj sidis silentaj kaj senmovaj, Faramiro rakontis sian historion, kun la okuloj direktitaj plejparte al Gandalfo, kvankam de tempo al tempo lia ekrigardo flankenturniĝis al Grinĉjo, kvazaŭ por refreŝigi sian memoron pri aliaj, kiujn li vidis.

Dum disvolviĝis lia rakonto pri la renkontiĝo kun Frodo kaj ties servanto kaj pri la okazaĵoj ĉe Heneto Anun, Grinĉjo konsciiĝis, ke la manoj de Gandalfo tremas kroĉante la ĉizitan lignaĵon. Blankaj ili jam ŝajnis kaj

tre maljunaj, kaj rigardante ilin, Grinĉjo konstatis kun ekflagro de timo, ke Gandalfo, eĉ Gandalfo, estas perturbita, eĉ timanta. La aero en la ĉambro estis prema kaj senmova. Kiam fine Faramiro parolis pri sia disiĝo de la vojaĝantoj kaj ties decido iri al Cirito Ungol, lia voĉo malfortiĝis, kaj li skuis sian kapon kaj suspiris. Tiam Gandalfo saltleviĝis.

— Ĉu Cirito Ungol? Morgula Valo? — li diris. — Kiam, Faramiro, kiam? Kiam vi disiĝis de ili? Kiam ili alvenus tiun malbenitan valon?

— Mi disiĝis de ili matene antaŭ du tagoj, — diris Faramiro. — De tie estas dek kvin leŭgoj ĝis la valo de Morgulduino, se ili iris rekte suden; kaj tiam ili estus ankoraŭ je kvin leŭgoj okcidente de la malbenita Turego. Plej rapide ili ne povus alveni tien antaŭ hodiaŭ, kaj eble ili ankoraŭ ne alvenis tien. Efektive mi komprenas, kion vi timas. Sed la mallumo ne rezultas de ilia aventuro. Ĝi komenciĝis hieraŭ vespere, kaj la tuta Itilio troviĝis sub la ombro hieraŭ nokte. Estas klare al mi, ke la Malamiko jam delonge planis atakon kontraŭ nin, kaj ties horo jam estis decidita antaŭ ol la vojaĝantoj lasis mian gardadon. Gandalfo paŝadis sur la planko.

— La mateno de antaŭ du tagoj, preskaŭ tri tagoj da vojaĝado! Kiom malproksimas la loko, kie vi disiĝis?

— Ĉirkaŭ dudek kvin leŭgoj laŭ birda flugo, — respondis Faramiro. — Sed mi ne povis veni pli rapide. Hieraŭ vespere mi bivakis ĉe Kairo Andros, tiu longa insulo en la Rivero norde, kiun ni defendas; kaj ĉevaloj estas tenitaj sur la ĉi-flanka bordo. Kiam la mallumo plifortiĝis, mi sciis, ke necesas rapido, do mi rajdis de tie kun tri aliaj, por kiuj ankaŭ troviĝis ĉevaloj. La restaĵon de mia trupo mi sendis suden por plifortigi la garnizonon ĉe la travadejoj de Osgiliado. Espereble mi ne faris mise? — Li rigardis sian patron.

— ĉu mise? — kriis Denetoro, kaj liaj okuloj flagris subite. — Kial vi demandas? La viroj estis sub via komando. Aŭ ĉu vi petas mian prijuĝon rilate ĉiujn viajn agojn? Via sinteno estas humila en mia ĉeesto, tamen jam delonge vi ne deviis de la propra vojo pro miaj konsiloj. Vidu, vi parolis lerte, kiel ĉiam; sed mi, ĉu mi ne vidis vian okulon turnita al Mitrandiro, por elserĉi, ĉu vi parolis bone aŭ tro multe? Li delonge kaptis vian koron. Filo mia, via patro estas maljuna, sed ankoraŭ ne kaduka. Mi povas vidi kaj aŭdi, kiel mi kutimis; kaj malmulto el tio, kion vi duone esprimis aŭ lasis neesprimita, estas nun kaŝita antaŭ mi. Mi konas la solvon de multaj enigmoj. Ve, ve pri Boromiro!

— Se al vi malplaĉas tio, kion mi faris, patro mia, — diris Faramiro kviete, — mi dezirus koni vian konsilon antaŭ ol la ŝarĝo de tiom peza decido estis donita al mi.

— Ĉu tio sufiĉus por ŝanĝi vian decidon? — diris Denetoro. — Vi plu

farus tute same, laŭ mia opinio. Mi tre bone konas vin. Ĉiam vi deziras aspekti majeste kaj malavare kiel reĝo de l' pratempo, degna kaj ĝentila. Tio eble taŭgas por iu altrasa, kiu sidas en potenco kaj paco. Sed dum horoj krizaj ĝentilecon eble repagos morto.

— Tiel estu, — diris Faramiro.

— ĉu tiel estu! — kriis Denetoro. — Sed ne nur via morto, mastro Faramiro: la morto ankaŭ de via patro, kaj de via tuta popolo, kiujn protekti estas jam via rolo, post la forpaso de Boromiro.

— Ĉu vi deziras do, ke niaj lokoj estus interŝanĝitaj?

— Jes, tion mi ja deziras, ĉar Boromiro estis lojala al mi kaj ne estis lernanto de iu sorĉisto. Li memorus la bezonon de sia patro kaj ne malŝparus tion, kion donis la sorto. Li alportus al mi la potencan donacon.

Momente la sinrego de Faramiro cedis.

— Mi petas vin, patro mia, memori kial okazis, ke mi, ne li, estis en Itilio. Je minimume unu okazo via konsilo venkis, antaŭnelonge. Ĝuste la Mastro de la Urbo donis al li tiun komision.

— Ne kirlu la feĉon en la taso, kiun mi miksis por mi mem, — diris Denetoro. — Ĉu mi ne gustis tion sur mia lango jam multajn noktojn, anticipante ke en la feĉo kaŝiĝas io eĉ pli malbona? Kiel nun mi efektive konstatas, ke tiel ne devis esti! Ke tiu aĵo devus esti veninta al mi!

— Konsolu vin! — diris Gandalfo. — Neniel Boromiro alportus al vi ĝin. Li estas mortinta, kaj mortis brave. Li dormu en paco! Tamen vi trompas vin. Li elstreĉus sian manon al tiu aĵo, kaj kaptinte ĝin li falus. Li retenus ĝin al si, kaj kiam li revenus, vi ne rekonus vian filon.

La vizaĝo de Denetoro rigidiĝis malmole kaj malvarme.

— Vi trovis Boromiron malpli lernema sub via mano, ĉu ne? — li diris mallaŭte. — Sed mi, lia patro, diras, ke li alportus ĝin al mi. Vi estas saĝa, eble, Mitrandiro, tamen malgraŭ ĉiuj viaj subtilaĵoj, vi ne posedas la tutan saĝecon. Troveblas solvoj, kiuj estas nek la araneaĵoj de sorĉistoj nek la rapidemo de stultuloj. Mi havas pri tiu ĉi afero pli da sperto kaj saĝo ol vi supozas.

— Kia estas do via saĝo? — demandis Gandalfo.

— Sufiĉa por percepti, ke du stultaĵoj estas evitendaj. Uzi tiun aĵon estas danĝeroplene. Je tiu ĉi horo sendi ĝin en la manoj de sensagaca duonulo al la lando de la Malamiko mem, kiel faris vi kaj jena filo mia, tio estas frenezaĵo.

— Kaj kion farus Reganto Denetoro?

— Neniun el ambaŭ. Sed plej certe ne pro iu ajn argumento li metus tiun aĵon al risko preter ĉio krom la espero de stultulo, riskante nian kompletan ruiniĝon se la Malamiko rehavos tion, kion li perdis. Ne, ĝi devus esti

retenita, kaŝita, kaŝita en mallumo kaj profundo. Ne uzota, mi diras, krom ĉe la lasta ekstremo de bezono, sed metita for de lia kroĉo, krom post venko tiel finfina, ke tio, kio okazos poste, ne tuŝus nin ĉar ni mortus.

— Vi pensas laŭ via kutimo, moŝto, nur pri Gondoro, — diris Gandalfo. — Tamen ekzistas aliaj homoj kaj aliaj vivoj, kaj tempo ankoraŭ estos. Kaj miaflanke, mi kompatas eĉ liajn sklavojn.

— Kaj kie aliaj homoj trovos helpon, se Gondoro falos? — respondis Denetoro. — Se mi nun havus tiun aĵon en iu el la profundaj keloj de tiu ĉi citadelo, ni ne tremus terurite sub tiu ĉi malhelo, timante la plej malbonan, kaj niaj konsiliĝoj estus neperturbitaj. Se vi ne fidas, ke mi tolerus la provon, vi ankoraŭ ne konas min.

— Malgraŭ ĉio mi vin ne fidas, — diris Gandalfo. — Se mi fidus, mi povus sendi tiun aĵon ĉi tien al via gardado kaj ŝparus al mi mem kaj al aliaj multe da angoro. Kaj nun, aŭdinte vian parolon, mi fidas vin malpli, ne pli ol Boromiron. Ne, regu vian koleron! Min mem mi ne fidas en ĉi afero, kaj mi rifuzis tiun aĵon, eĉ kiel donacon libere donitan. Vi estas forta kaj pri certaj aferoj ankoraŭ kapablus regi vin, Denetoro; tamen se vi ricevus tiun aĵon, ĝi venkus vin. Eĉ se ĝi estus enterigita sub la radikoj de Mindoluino, ĝi tamen forbruligus vian menson, kiel kreskas la mallumo, kaj la aferoj ankoraŭ pli malbonaj sekvus, kiuj baldaŭ trafos nin.

Momente la okuloj de Denetoro denove ardis, kiam li frontis al Gandalfo, kaj Grinĉjo sentis denove la streĉitecon inter iliaj voloj; sed nun ŝajnis preskaŭ ke iliaj rigardoj estas rapiroj de okulo al okulo, flagrantaj dum la skermado. Grinĉjo tremis timante iun teruran baton. Sed subite Denetoro malstreĉiĝis kaj denove malardiĝis. Li ŝultrotiris.

— Se mi us! Se vi us! — li diris. — Tiaj vortoj kaj seoj vanas. Ĝi eniris la ombron, kaj nur la tempo montros, kia sorto atendas ĝin kaj nin. Tiu tempo ne estos longa. En la restaĵo, ĉiuj, kiuj siamaniere batalas kontraŭ la Malamiko, unuiĝu, kaj esperu dum tio eblos, kaj post la espero ankoraŭ kuraĝu morti liberaj. — Li turnis sin al Faramiro. — Kion vi opinias pri la garnizono ĉe Osgiliado?

— Ĝi ne estas forta, — diris Faramiro. — Mi sendis la trupon de Itilio por plifortigi ĝin, kiel mi jam diris.

— Ne sufiĉos, ŝajnas al mi, — diris Denetoro. — Ĝuste tie falos la unua bato. Oni bezonos tie iun bravan komandanton.

— Tie kaj en multaj aliaj lokoj, — diris Faramiro kaj ĝemspiris. — Ve pri mia frato, kiun ankaŭ mi amis! — Li stariĝis. — Ĉu vi permesas, patro?

Kaj tiam li ŝanceliĝis kaj apogis sin al la seĝo de la patro.

— Vi estas laca, mi vidas, — diris Denetoro. — Vi rajdis rapide kaj longe, kaj sub misombroj en la aero, oni diris al mi.

— Pri tio ni ne parolu! — diris Faramiro.

— Do ni ne parolos, — diris Denetoro. — Iru nun kaj ripozu laŭeble. La neceso morgaŭ estos pli severa. Ĉiuj nun forlasis la Mastron de la Urbo kaj iris ripozi, dum tio ankoraŭ eblis. Ekstere estis senstela mallumo, dum Gandalfo kun Grinĉjo, apude portanta malgrandan torĉon, vojis al sia loĝejo. Ili ne parolis ĝis kiam ili estis malantaŭ fermitaj pordoj. Tiam finfine Grinĉjo kaptis la manon de Gandalfo.

— Diru al mi, ĉu ekzistas iu espero? Rilate Frodon, mi volas diri; aŭ almenaŭ ĉefe rilate Frodon.

Gandalfo metis manon sur la kapon de Grinĉjo.

— Neniam estis multe da espero, — li respondis. — Nur espero de stultulo, kiel oni diris al mi. Kaj kiam mi aŭdis pri Cirito Ungol... — Li interrompis sin kaj paŝis al la fenestro, kvazaŭ liaj okuloj kapablus trapiki la nokton oriente. Li murmuris: — Cirito Ungol! Kial tiuvoje, mi scivolas? — Li turniĝis. — Ĝuste nun, Grinĉjo, mia koro preskaŭ krevis, aŭdinte tiun nomon. Kaj tamen mi opinias vere, ke la novaĵo alportita de Faramiro portas en si iom da espero. Ĉar ŝajnas klare, ke nia Malamiko finfine ekmilitis kaj faris la unuan movon, dum Frodo ankoraŭ liberas. Do dum multaj tagoj ekde nun lia okulo turniĝos tien kaj reen, for de la propra lando. Kaj tamen, Grinĉjo, mi sentas defore lian haston kaj lian timon. Li komencis pli frue ol li volus. Okazis io por instigi lin.

Gandalfo staris momente en pensado.

— Eble, — li murmuris. — Eble helpis eĉ via stultaĵo, knabo mia. Mi pripensu: jam antaŭ proksimume kvin tagoj li certe malkovris, ke ni venkis Sarumanon kaj prenis la Ŝtonon. Sed kiel gravis? Ni ne povus ĝin uzi tre utile, nek sen lia ekscio. Ha, mi scivolas. Ĉu Aragorno? Proksimiĝas lia horo. Kaj li estas forta kaj firma kiel fundamento, Grinĉjo; kuraĝa, senŝancela, kapabla agi laŭ propra volo kaj riskegi, se necese. Eble pro tio. Li eble utiligis la Ŝtonon kaj montris sin al la Malamiko, defiante lin, ĝuste tiucele. Mi scivolas. Nu, la respondon ni ne ricevos ĝis venos la rajdistoj de Rohano, se ili venos ne tro malfrue. Antaŭ ni estas tagoj malbonegaj. Ni dormu, dum ni tion povas!

— Sed, — diris Grinĉjo.

— Sed kio? — demandis Gandalfo. — Nur unu sedon mi permesos ĉi-nokte.

— Golumo, — diris Grinĉjo. — Kiel okazas, ke ili vojaĝas *kun* li, eĉ sekvas lin? Kaj mi konstatis, ke al Faramiro ne pli ol al vi plaĉis la loko, al kiu li kondukas ilin. Kio misas?

— Tion mi ne povas respondi nun, — diris Gandalfo. — Tamen mia koro konjektis, ke Frodo kaj Golumo renkontiĝos antaŭ la fino. Por bono aŭ

malbono. Sed pri Cirito Ungol mi ne parolos hodiaŭ nokte. Perfidon, perfidon mi timas; perfidon far tiu mizera kreaĵo. Sed tiel devas esti. Ni memoru, ke perfidulo povas perfidi sin mem kaj okazigi bonon senintence. Povas esti tiel, kelkfoje. Bonan nokton!

La posta tago venis per mateno simila al bruna krepusko, kaj la homaj koroj, provizore levitaj pro la reveno de Faramiro, denove perturbiĝis. La flugilhavaj kreaĵoj ne estis viditaj tiutage, tamen de tempo al tempo, alte super la urbo, aŭdiĝis mallaŭta krio, kaj multaj, kiuj aŭdis tion, staris frapite de pasema timego, dum la malpli kuraĝaj kunpremiĝis kaj ploris.

Kaj nun Faramiro denove foriris.

— Oni permesis al li neniom da ripozo, — iuj murmuris. — La Mastro tro senindulge pelas sian filon, kaj nun li devas plenumi la devon de du, de li kaj de tiu, kiu ne revenos.

Kaj ĉiam la homoj rigardis norden, demandante:

— Kie estas la rajdistoj de Rohano?

Fakte Faramiro ne iris propravole. Sed la Mastro de la Urbo estis estro de sia konsilio, kaj tiutage li ne havis humoron sin klini antaŭ aliaj. En la frumateno la konsilio estis kunvokita.

Tie ĉiuj komandantoj taksis, ke pro la minaco en la sudo ilia forto ne sufiĉas por entrepreni militagadon propraflanke, krom se hazarde la rajdistoj de Rohano tamen venus. Dume ili devos gardostari sur la muroj kaj atendi.

— Malgraŭ ĉio, — diris Denetoro, — ni ne devus tro facilanime forlasi la eksterajn defendejojn de Ramaso, kiuj estis konstruitaj per tiom da laborego. Kaj la Malamiko devos pagi multekoste la transiron de la Rivero. Tion li ne povos fari sufiĉe multnombre por ataki la Urbon, ĉu norde de Kairo Andros pro la marĉoj, ĉu sude en la direkto de Lebenino pro la larĝeco de la Rivero, kiu postulas multajn boatojn. Ĝuste ĉe Osgiliado li lokigos sian pezon, kiel pli frue, kiam Boromiro rifuzis al li la trapason.

— Tio estis nura esploro, — diris Faramiro. — Hodiaŭ ni eble pagigus dekoble la malamikon pli ol nin ĉe la pasejo kaj tamen bedaŭrus la interŝanĝon. Ĉar li malpli damaĝe por si perdus armeon ol ni perdus trupon. Kaj la retreto de tiuj, kiujn ni elmetos sur la fora kampo, estos danĝeroplena, se li sukcesos multnombre transiri.

— Kaj kio pri Kairo Andros? — diris princo Imrabilo. — Ankaŭ tiu devos esti defendata, se oni defendos Osgiliadon. Ni ne forgesu la danĝeron je nia maldekstro. La rohananoj eble venos, eble ne. Sed Faramiro sciigis nin pri grandaj fortoj senĉese alirantaj la Nigran Pordegon. Pli ol unu armeo eble eliros tra ĝi, kaj celos pli ol unu trapasejon.

— Multo estas riskenda dum milito, — diris Denetoro. — En Kairo Andros jam estas soldatoj, kaj neniom pli oni povas sendi tiel foren. Sed mi

ne cedos senbatale la Riveron kaj Pelenoron, dum ankoraŭ estas komandanto ĉi tie, kiu plu kuraĝas agi laŭ la volo de sia estro.

Poste ĉiuj silentis. Sed finfine Faramiro diris:

— Mi ne kontraŭas vian volon, moŝto. Ĉar rabita al vi estas Boromiro, mi iros kaj faros laŭ mia eblo anstataŭ li, se vi tion ordonas.

— Mi ordonas, — diris Denetoro.

— Do, adiaŭ! — diris Faramiro. — Sed se mi revenos, pensu pli favore pri mi!

— Tio dependos de la maniero de via reveno, — diris Denetoro. Gandalfo la lasta parolis al Faramiro, antaŭ ol tiu rajdis orienten.

— Ne forĵetu vian vivon malprudente aŭ pro amareco, — li diris. — Vi estas bezonata ĉi tie por aliaj aferoj krom milito. Via patro amas vin, Faramiro, kaj tion memoros antaŭ la fino. Adiaŭ!

Do nun estro Faramiro estis for denove, kaj kunprenis tiom da viroj, kiom konsentis iri aŭ estis malhaveblaj. Sur la muroj iuj rigardis tra la malhelo al la ruinigita urbo, kaj ili scivolis kio okazas tie, ĉar nenio estis videbla. Kaj aliaj, kiel ĉiam, rigardis norden kaj kalkulis la leŭgojn ĝis Teodeno en Rohano.

— Ĉu li venos? Ĉu li memoros nian malnovan aliancon? — ili diris.

— Jes, li venos, — diris Gandalfo, — eĉ se li venos tro malfrue. Sed pensu! En plej bona kazo la Ruĝa Sago ne povis atingi lin pli frue ol antaŭ du tagoj, kaj multas la mejloj de Edoraso.

Estis denove nokte, kiam venis novaĵo. Homo rajdis haste de la trapasejoj, dirante ke armeo eliris el Minaso Morgul kaj jam proksimiĝas al Osgiliado; kaj aliĝis al ĝi regimentoj el la sudo, haradanoj, kruelaj kaj altaj.

— Kaj mi eksciis, — diris la kuriero, — ke la Nigra Komandanto estras ilin denove, kaj timo pri li antaŭis lin trans la Riveron.

Per tiuj misaŭguraj vortoj fermiĝis la tria tago de kiam Grinĉjo venis al Minaso Tirit. Malmultaj iris ripozi, ĉar malmulte da espero havis iu ajn, ke eĉ Faramiro sukcesos longe bari la trapasejojn.

La postan tagon, kvankam la mallumo atingis sian zeniton kaj ne pli densiĝis, ĝi pli peze deprimis la homajn korojn, kaj ilin plenigis granda antaŭtimo. Malagrabla novaĵo baldaŭ venis.

La Malamiko transiris Anduinon. Faramiro retretis al la muro de Pelenoro, kuraĝigante siajn soldatojn ĝis la Digvojaj Fortikaĵoj; sed li estis dekoble supernombrita.

— Se li entute sukcesos transiri Pelenoron, liaj malamikoj baldaŭ lin dense sekvos, — diris la kuriero. — Ili pagis multekoste la transiron, sed malpli multekoste ol ni esperis. La plano estas bone preparita. Vidiĝas nun, ke ili longe konstruadis en la orienta Osgiliado flosojn kaj pramojn

multnombre. Ili transsvarmis kvazaŭ skaraboj. Sed ĝuste la Nigra Komandanto venkas nin. Malmultaj pretas stari kaj toleri eĉ onidiron pri lia alveno. Lia propra popolo timegas lin, kaj ili mortigus sin se li ordonus.

— Do tie mi necesas pli ol ĉi tie, — diris Gandalfo kaj tuj forrajdis, kaj lia ekbrilo baldaŭ forvelkis el la vidkampo. Kaj tiun tutan nokton Grinĉjo sola kaj sendorma staris sur la muro kaj rigardadis orienten.

Apenaŭ denove sonoris la tagsonoriloj, mokaĵo en la senluma malhelo, kiam en la malproksimo li vidis ekflamon de fajroj, transe en la malklaraj spacoj, kie staris la muroj de Pelenoro. La sentineloj ekkriis, kaj ĉiuj viroj en la Urbo posteniĝis. Nun de tempo al tempo vidiĝis ruĝa ekflamo, kaj malrapide tra la peza aero aŭdiĝis obtuzaj muĝoj.

— Ili kaptis la muron! — homoj kriis. — Ili eksplode trabrečas ĝin. Hi venas!

— Kie estas Faramiro? — kriis Beregondo maltrankvile. — Ne diru, ke li falis!

Ĝuste Gandalfo alportis la unuajn novaĵojn. Kun manpleno da rajdistoj li venis mezmatene, rajdante kiel eskorto de vico da furgonoj. Ili estis plenaj je vunditoj, kiujn oni sukcesis savi el la ruinaĵo de la Digvojaj Fortikaĵoj. Li tuj iris al Denetoro.

La Mastro de la Urbo sidis en alta ĉambro super la halego de la Blanka Turego kun Grinĉjo apude. Tra la malhelaj fenestroj norden, suden kaj orienten li direktis siajn malhelajn okulojn, kvazaŭ por trapiki la ombrojn de la sorto, kiuj ĉirkaŭringis lin. Plejparte norden li rigardis, kaj paŭzis kelkfoje por aŭskulti, kvazaŭ per ia antikva lerteco liaj oreloj povus aŭdi tondradon de hufoj sur la malproksimaj ebenaĵoj.

— Ĉu Faramiro venis? — li demandis.

— Ne, — diris Gandalfo. — Sed li vivis ankoraŭ, kiam mi forlasis lin. Tamen li firme intencas resti kun la ariergardo, por ke la retreto trans Pelenoron ne fariĝu disfuĝo. Eble li povos kunteni siajn virojn sufiĉe longe, kvankam mi dubas pri tio. Li frontas malamikojn tro multajn. Ĉar alvenis iu, pri kiu mi timis.

— Ne... ne la Malhela Mastro, ĉu? — ekkriis Grinĉjo, forgesinte pro teruro sian servistecon.

Denetoro ridis amare.

— Ne, ankoraŭ ne, sinjoro Peregrino! Li ne venos, krom nur por ĝui sian triumfon kontraŭ mi post kiam la tuto estos venkita. Aliulojn li uzas kiel armilojn. Tion faras ĉiuj grandaj estroj, se ili sagacas, sinjoro duonulo. Alie, kial mi sidu ĉi tie en mia turego kaj pensu, kaj gvatu, kaj atendu, elspezante eĉ miajn filojn? Ĉar mi ankoraŭ kapablas svingi glavon.

Li stariĝis kaj ĵetmalfermis sian longan nigran mantelon, kaj jen! li estis

maŝkirase vestita sube, kaj ĉe la zono estis longa glavo, grandtenila en ingo el nigro kaj arĝento.

— Tia mi marŝas, kaj tia jam delonge dum multaj jaroj mi dormas, — li diris, — por ke mia korpo ne moliĝu kaj timiĝu pro maljuneco.

— Tamen nun sub la Mastro de Baraduro la plej danĝera el ĉiuj liaj komandantoj jam tenas viajn eksterajn murojn, — diris Gandalfo.

— Reĝo de Angmaro antaŭlonge, sorĉisto, ringofantomo, Mastro de la nazguloj, lanco de teroro en la mano de Saŭrono, ombro de malespero.

— Tiuokaze, Mitrandiro, vi havis kontraŭulon egalecan, — diris Denetoro. — Miaflanke, mi delonge scias, kiu estas la ĉefa armeestro de la Malhela Turego. Ĉu vi revenis nur por diri tiom? Aŭ ĉu eble vi retretis, ĉar vi estis superfortita?

Grinĉjo tremis, timante ke Gandalfo estos spronita al subita kolero, sed lia timo estis senbaza.

— Povus esti, — Gandalfo respondis mallaŭte. — Sed nia fortkonkuro ankoraŭ ne okazis. Kaj se vortoj prononcitaj pratempe veras, ne pro vira mano li pereos, kaj kaŝita antaŭ la Saĝuloj estas la sorto atendanta lin. Kiel ajn, la Komandanto de Malespero ankoraŭ ne urĝas antaŭen, ĝis nun. Li regas prefere laŭ tiu saĝo, pri kiu vi ĵus parolis, de la ariergardo, pelante antaŭ si la frenezigitajn sklavojn. Ne, mi venis por gardi la vunditojn, kiuj ankoraŭ kuraceblas, ĉar Ramaso estas breĉita tre vaste, kaj baldaŭ la armeo de Morgulo trairos multloke. Kaj mi venis ĉefe por diri jenon. Baldaŭ okazos batalo sur la kampoj. Atakeliro devas esti pretigita. Ĝi estu rajdista. Ĉe ili kuŝas nia mallonga espero, ĉar nur unurilate la malamikoj estas magre provizitaj: ili havas malmultajn rajdistojn.

— Ankaŭ ni havas malmultajn. Nun alveno de Rohano estus ĝustatempa, — diris Denetoro.

— Ni probable vidos unue aliajn venintojn, — diris Gandalfo. — Fuĝintoj el Kairo Andros jam atingis nin. La insulo falis. Alia armeo venis de la Nigra Pordego, transirinte el la nord-oriento.

— Iuj akuzis vin, Mitrandiro, ke vi ĝojas alporti malbonajn novaĵojn, — diris Denetoro, — sed por mi tio ne plu estas novaĵo: mi sciis pri ĝi antaŭ la noktiĝo hieraŭ. Rilate la eliratakon, mi jam pripensis tion. Ni malsupreniru.

Pasis la tempo. Finfine la surmuraj gvatantoj povis vidi la retreton de la eksteraj trapoj. Unue venis etaj aroj da lacaj kaj vunditaj soldatoj en malmulte da ordo; iuj kuris freneze kvazaŭ persekutataj. En la fora oriento la malproksimaj fajroj flagris; kaj nun ŝajnis, ke ie-tie ili rampas trans la ebenaĵon. Domoj kaj grenejoj brulis. Poste de multaj lokoj riveretoj da ruĝaj flamoj antaŭiris haste, serpentumante tra la malhelo, konverĝante al la linio

de la larĝa vojo kondukanta de la Urba Pordego al Osgiliado.

— La malamikoj, — homoj murmuris. — La digo falis. Jen ili venas, verŝiĝante tra la breĉoj! Kaj ili portas torĉojn, ŝajnas. Kie estas niaj homoj?

Ĉiuhore proksimiĝis la vespero, kaj tiel malhelis la lumo, ke eĉ forviduloj sur la Citadelo povis klare distingi malmulton sur la kampoj, krom nur bruladoj ĉiam plimultiĝantaj, kaj la fajrlinioj, kiuj kreskis longece kaj rapidece. Fine, je malpli ol unu mejlo de la Urbo, vidiĝis homamaso pli orda, marŝanta ne kurante, ankoraŭ kunstrebanta.

La gvatantoj retenis sian spiron.

— Faramiro nepre estas tie, — ili diris. — Li scias regi homojn kaj bestojn. Malgraŭ ĉio li trairos.

Nun la retretantoj foris je apenaŭ du mejl-okonoj. El la malhelo malantaŭa galopis eta trupo da rajdistoj, la tuta restaĵo de la ariergardo. Ankoraŭfoje ili turnis sin defie, frontante la proksimiĝantajn fajrliniojn. Subite aŭdiĝis sovaĝa kritumulto. Rajdistoj de la malamiko alsturmis. La fajrlinioj iĝis fluaj torentoj, vico post vico da orkoj portantaj flamojn, kaj sovaĝaj sudanoj kun ruĝaj standardoj, kriante en aspraj lingvoj, alondante, atingante la retretantojn. Kaj kun pika krio el la malklara ĉielo plonĝis la flugilhavaj ombroj — nazguloj descendantaj por mortigi.

La retreto iĝis disfuĝo. Jam homoj forŝiriĝis, disfuĝante freneze kaj sensence, forĵetante siajn armilojn, time kriegante, falante teren.

Kaj tiam sonoris trumpeto en la Citadelo, kaj Denetoro finfine ellasis la atakeliron. Ordigite en la ombro de la Pordego kaj sub la baŭmantaj muroj ekstere, ili atendis lian signalon: ĉiuj rajdistoj, kiuj restis en la Urbo. Nun ili saltis antaŭen, enviciĝis, ekgalopis kaj alsturmis kun granda krio. Kaj de sur la muroj leviĝis responda krio; ĉar unue sur la batalkampo rajdis la cigno-kavaliroj de Dol Amroto kun sia princo kaj ties blua standardo antaŭe.

— Amroto por Gondoro! — ili kriis. — Amroto al Faramiro!

Tondrece ili sturmis la malamikojn ambaŭflanke de la retretanta trupo; sed unu rajdanto postlasis ĉiujn, rapida kiel vento tra la herbo: Ombrofakso portis lin, brilantan, denove senvualan, kun lumo suprenŝoviĝanta de lia levita mano.

La nazguloj kriĉis kaj forsvingiĝis, ĉar ilia Komandanto ankoraŭ ne venis por defii la blankan fajron de sia kontraŭulo. La armeo de Morgulo koncentrite al sia predo, senaverte trafita meze de freneza sturmo, deviis, disirante kvazaŭ fajreroj pro ventego. La retretanta trupo kun laŭta hurao returnis sin kaj batis siajn persekutintojn. La persekutitoj iĝis persekutantoj. La retreto iĝis atako. Sur la kampo estis sternitaj frapitaj orkoj kaj homoj, kaj fetoro leviĝis de forĵetitaj torĉoj, flagre estingiĝantaj en kirla fumo. La rajdistoj plurajdis.

Sed Denetoro ne permesis, ke ili iru tro foren. Kvankam la malamikoj estis haltigitaj kaj provizore retropelitaj, grandaj soldataroj enfluadis el la oriento. Denove sonoris la trumpeto, signalante retiriĝon. La rajdistaro de Gondoro haltis. Malantaŭ ties ŝirmbaro reformiĝis la eksteraj trupoj. Poste ili orde retromarŝis. Ili atingis la Pordegon de la Urbo kaj fiere reeniris; kaj fiere la urbanoj rigardis ilin kaj kriis siajn laŭdojn, kaj tamen ili restis kore perturbitaj. Ĉar la trupoj estis grave reduktitaj. Faramiro perdis trionon de siaj viroj. Kaj kie estis li?

Lasta el ĉiuj li venis. Liaj soldatoj pasis internen. La surĉevalaj kavaliroj revenis, kaj ariere la standardo de Dol Amroto, kaj la princo. Kaj sur la brakoj antaŭ si li portis la korpon de sia parenco Faramiro, filo de Denetoro, trovitan sur la batalkampo.

— Faramiro! Faramiro! — oni kriis, plorante sur la stratoj. Sed tiu ne respondis, kaj oni forportis lin laŭ la serpentuma vojo supren al la Citadelo kaj lia patro. Guste kiam la nazguloj flanken iris for de l' atako de la Blanka Rajdanto, venis mortiga sageto, kaj Faramiro, dum li skermis kun surĉevala batalmajstro el Harado, falis teren. Nur la alsturmo de Dol Amroto savis lin de la ruĝaj sudlandaj glavoj, kiuj volis dishaki lin kuŝantan.

Princo Imrahilo portis Faramiron ĝis la Blanka Turego kaj diris:

— Via filo revenis, sinjoro, post bravaj faroj, — kaj li rakontis ĉion, kion li vidis. Sed Denetoro stariĝis kaj rigardis la vizaĝon de sia filo kaj silentis. Poste li ordonis, ke oni starigu liton en la ĉambro kaj kuŝigu Faramiron sur ĝin kaj foriru. Sed li mem iris sola en la sekretan ĉambron sub la supro de la Turego kaj multaj, kiuj rigardis tien tiutempe vidis palan lumon, kiu ekbrilis kaj flagris ĉe la mallarĝaj fenestroj dum kelka tempo kaj estingiĝis. Kiam Denetoro denove descendis, li iris al Faramiro kaj sidis apud li senparole, sed la vizaĝo de la Mastro estis griza, pli mortsimila ol tiu de lia filo.

Do finfine la Urbo estis sieĝata, enfermita en ringo de malamikoj. Ramaso estis rompita, kaj la tuta Pelenoro okupita de la Malamiko. La lasta sciigo el ekster la muroj estis portita de homoj fuĝintaj laŭ la nord-vojo antaŭ ol la Pordego estis fermita. Tiuj estis restaĵo de la gardistoj, kiuj postenis ĉe tiu loko, kie la vojo el Anorieno kaj Rohano eniris la urbajn terenojn. Ingoldo estris ilin, tiu sama kiu enlasis Gandalfon kaj Grinĉjon antaŭ malpli ol kvin tagoj, dum la suno ankoraŭ leviĝis kaj en la mateno estis espero.

— Mankas novaĵoj pri la rohananoj, — li diris. — Rohano jam ne venos. Aŭ se venos, tio ne helpos nin. Venis unue la nova armeo, pri kiu ni estis informitaj, el trans la Rivero laŭvoje de Androso, oni diras. Tiu estas forta: batalionoj da orkoj de l' Okulo, kaj sennombraj trupoj da homoj

novspecaj, kies specon ni antaŭe ne renkontis. Ne altaj, sed larĝaj kaj severaj, barbozaj kvazaŭ gnomoj, portantaj hakilegojn. El iu sovaĝa lando en la vasta oriento ili venis, laŭ nia supozo. Ili tenas la nord-vojon; kaj multaj pluiris en Anorienon. La rohananoj ne povos veni.

La Pordego estis fermita. La tutan nokton sentineloj sur la muroj aŭdis rumoron de la malamikoj vagantaj ekstere, bruligantaj kampojn kaj arbojn, kaj hakantaj ĉiun homon, kiun ili trafis ekstere, ĉu vivan aŭ mortan. La nombron de tiuj, kiuj jam trapasis la Riveron, oni ne povis diveni, sed kiam la mateno, aŭ ties malhela ombro, ŝteliris sur la ebenaĵon, videblis, ke eĉ nokta timo apenaŭ tromultigis ilin. La ebenaĵo estis nigra pro la marŝantaj trupoj, kaj tiel malproksime, kiel okuloj povis strecĥrigardi en la malhelo, kreskis, kvazaŭ fiaj fungaĉoj, ĉie ĉirkaŭ la sieĝata urbo grandaj tendaroj nigraj aŭ sombre ruĝaj.

Formikece okupataj, hastantaj orkoj fosis, fosadis vicojn da profundaj tranĉeoj laŭ granda ringo, tuj post la sagatingo de sur la muroj; kaj kiam ajna tranĉeo kompletiĝis, ĝi estis plenigita de fajro, kvankam kiel ĝi estis bruligata aŭ nutrata, neniu povis vidi. La tutan tagon la laborego progresis, dum la homoj de Minaso Tirit spektis, ne kapablaj malhelpi ĝin. Kaj kiam ĉiu tranĉeolongo kompletiĝis, oni povis vidi proksimiĝon de grandaj furgonoj; kaj baldaŭ ankoraŭ pli da trupoj de la malamikoj rapide starigis post la ŝirmo de tranĉeo grandajn maŝinojn por ĵetado de pafaĵoj. Nenio tia sur la urbaj muroj sufiĉe grandis por atingi tien aŭ haltigi la laboron.

Komence la homoj ridis kaj ne tre timis tiajn maŝinojn. La ĉefmuro de la Urbo estis tre alta kaj mirinde dika, konstruita antaŭ ol la potenco kaj lerto de Numenoro velkis en ekzilo; kaj ĝia ekstera faco similis la Turegon de Ortanko, malmola, malhela kaj glata, nevenkebla per ŝtalo aŭ fajro, nefrakasebla krom per ia konvulsio, kiu fendus la teron mem, sur kiu ĝi staris.

— Ne, — ili diris, — eĉ se venus la Nenomenda mem, eĉ li ne kapablus enveni ĉi tien, dum ni plu vivas.

Sed kelkaj respondis:

— Ĉu dum ni plu vivas? Kiom longe? Li posedas armilon, kiu malstarigis multajn fortikaĵojn de kiam la mondo komenciĝis. Malsato. La vojoj estas baritaj. Rohano ne venos.

Sed la maŝinoj ne malŝparis municion kontraŭ la nerompebla muro. Ne estis iu bandito aŭ ĉeforko, kiu ordonis la atakon kontraŭ la plej forta malamiko de la Mastro de Mordoro. Gvidis ĝin potenco kaj malica menso. Tuj kiam la grandaj katapultoj estis pretaj, kun multaj krioj kaj tirado de ŝnuregoj kaj vinĉo, oni komencis ĵeti pafaĵojn mirinde alten, tiel ke ili trapasis super la remparon kaj falis obtuze brue en la unua cirklo de la Urbo;

kaj multaj el ili pro ia sekreta arto ekflamis malsuprenire.

Baldaŭ estiĝis granda fajrodanĝero malantaŭ la muro, kaj ĉiuj kiuj haveblis okupiĝis estingante la flamojn, kiuj ekbrulis en multaj lokoj. Poste inter la pli grandaj ĵetoj falis alia hajlo, malpli ruiniga sed pli terura. Ĉie sur la stratoj kaj vojetoj malantaŭ la Pordego falis etaj rondaj pafaĵoj, kiuj ne flamiĝis. Sed kiam la homoj kuris por konstati, kio estas tio, ili kriis aŭ ploris. Ĉar la malamikoj ĵetadis en la Urbon la kapojn de tiuj, kiuj mortis batalante ĉe Osgiliado, ĉe Ramaso, aŭ sur la kampoj. Tiuj estis teruraj; ĉar kvankam kelkaj estis kunpremitaj kaj senformaj, kaj iuj estis kruele hakitaj, tamen multaj havis vizaĝojn rekoneblajn, kaj ŝajnis, ke tiuj mortis en doloro; kaj ĉiuj estis brulstampitaj je la fia signo de la Senpalpebra Okulo. Sed malgraŭ ke ili estis difektitaj kaj malhonoritaj, ofte okazis, ke iu revidis vizaĝon de konito, kiu iam marŝis fiere armite, aŭ plugis la kampon, aŭ alrajdis libertempe el la verdaj valoj inter la montoj.

Vane homoj skuis siajn pugnojn kontraŭ la senkompataj malamikoj svarmantaj ĉe la Pordego. Malbenojn ili ne atentis, nek komprenis la lingvojn de okcidentanoj, kriante per aspraj vortoj kvazaŭ bestoj aŭ karnomanĝaj birdoj. Sed baldaŭ troviĝis malmultaj en Minaso Tirit, kiuj plu sufiĉe entuziasmis por stariĝi kaj defii la armeojn de Mordoro. Ĉar ankoraŭ unu armilon, pli rapidan ol la malsato, havis la Mastro de *l' Malluma Turego: timon kaj malesperon*.

La nazguloj revenis, kaj dum ilia Malhela Mastro kreskis kaj sendis sian volon, iliaj voĉoj, kiuj esprimis nur lian volon kaj lian malicon, estis plenaj de miso kaj hororo. Ĉiam ili cirkulis super la Urbo, kiel vulturoj atendantaj satmanĝon de la karno de kondamnitoj. Nevideble kaj nepafeble ili flugis, kaj tamen senĉese ĉeestis, kaj iliaj mortminacaj voĉoj fendis la aeron. Pli netolereblaj ili iĝis kun ĉiu nova kriĉo. Finfine eĉ la kuraĝuloj komencis ĵeti sin teren, kiam la kaŝita minaco pasis supre, aŭ ili staris lasante, ke la armiloj falu el iliaj sennervaj manoj dum en iliajn mensojn venis ia nigreco, kaj ili ne plu pensis pri batalado, sed nur pri sinkaŝado aŭ pri rampado, kaj pri morto.

Dum tiu tuta nigra tago Faramiro kuŝis sur sia lito en la ĉambro de la Blanka Turego, vagante en furioza febro; mortanta, diris iu, kaj baldaŭ "mortanta" ĉiuj diris sur la muroj kaj sur la stratoj. Kaj apud li sidis lia patro kaj diris nenion, sed rigardis, kaj ne plu atentis la defendadon.

Neniam horojn tiel senlumajn konis Grinĉjo, eĉ ne kaptite de la uruk-hajoj. Lia devo estis servi sian Mastron, kaj tion li faris, ŝajne forgesite, starante apud la pordo de la nelumigita ĉambro, regante laŭeble siajn proprajn timojn. Kaj dum li atendis, ŝajnis al li, ke Denetoro maljuniĝas antaŭ liaj okuloj, kvazaŭ rompiĝus io en lia volo fiera, kaj lia severa menso

estus renversata. Malĝojo eble kaŭzis tion, kaj kulposento. Li vidis larmojn sur tiu iam senlarma vizaĝo, pli netolereblajn ol kolero.

— Ne ploru, sinjoro, — li balbutis. — Eble li resaniĝos. Ĉu vi demandis Gandalfon?

— Ne konsolu min per sorĉistoj! — diris Denetoro. — La stultula espero malvenkis. La Malamiko trovis ĝin, kaj nun lia potenco plifortiĝas; li vidas eĉ niajn pensojn, kaj ĉio, kion li faras, estas ruiniga. Mi forsendis mian filon sendankan, nebenitan, en nenecesan danĝeron, kaj jen li kuŝas kun veneno en la vejnoj. Ne, ne, kio ajn eble nun okazos en la milito, ankaŭ mia linio finiĝas, falas eĉ la Domo de la Regantoj. Maleminentuloj regos la restaĵon de la popolo de la reĝoj de l' homoj, sinkaŝante en la montaro ĝis ĉiuj estos elpelitaj.

Venis al la pordo homoj vokantaj la Mastron de la Urbo.

— Ne, mi ne iros suben, — li diris. — Mi devas resti apud mia filo. Li eble parolos antaŭ la fino. Sed tiu proksimas. Sekvu kiun ajn vi volas, eĉ la Grizan Stultulon, kvankam lia espero malvenkis! Mi restos ĉi tie.

Tiel okazis, ke Gandalfo ekkomandis la lastan defendon de la Ĉefurbo de Gondoro. Kien ajn li iris, la homaj koroj refortiĝis, kaj la flugilhavaj ombroj forpasis el la memoro. Senlace li paŝadis de Citadelo ĝis la Pordego, de la nordo ĝis la sudo sur la muroj; kaj kun li iris la princo de Dol Amroto en sia brila maŝkiraso. Ĉar tiu kaj ties viroj plu sintenis kiel princoj en kiuj la raso de Numenoro restis senmakula, oni vidante ilin flustris:

— Verŝajne la malnovaj rakontoj parolis veron; en la vejnoj de tiu popolo estas sango elfa, ĉar iam antaŭ longe la Nimrodela popolo loĝis en tiu lando.

Kaj tiam kutime iu kantis en la malhelo kelkajn versojn de la kanto pri Nimrodela aŭ aliajn kantojn de la Valo Anduina el malaperintaj jaroj.

Kaj tamen, kiam ili foriris, la ombroj denove ĉirkaŭis la homojn kaj iliaj koroj fridiĝis, kaj la kuraĝo de Gondoro velke cindriĝis. Kaj tiel malrapide ili forpasis el tago malhela je timoj en la mallumon de furioza nokto. Fajroj jam flamegis sen malhelpo en la unua cirklo de la Urbo, kaj la garnizono sur la ekstera muro estis jam multloke barita de retroiro. Sed la fideluloj restantaj tie ĉepostene estis malmultaj; la plimulto jam fuĝis tra la dua pordego.

Fore malantaŭ la batalo, la Rivero estis rapide trapontita, kaj dum la tuta tago pli da soldatoj kaj armiloj transverŝiĝis. Finfine en mezo de la nokto atako komenciĝis. La avangardo trapasis la fajrotranĉeojn per multaj malrektaj padoj lasitaj inter ili. Oni iris antaŭen malzorgaj pri perditoj dum la avanco, ankoraŭ kunproksimaj kaj pelataj, en pafatingon de la pafarkistoj sur la muro. Sed efektive restis tie tro malmultaj por kaŭzi grandan

malutilon, kvankam la fajrolumo vidigis multajn celindulojn por pafarkistoj tiel lertaj, kiel Gondoro iam prifieris. Tiam konstatante, ke la braveco de la Urbo estas jam terenbatita, la kaŝita Komandanto elmetis siajn fortojn. Malrapide la grandaj sieĝturoj, konstruitaj en Osgiliado, ruliĝis antaŭen tra la mallumo.

Mesaĝistoj venis denove al la ĉambro en la Blanka Turego, kaj Grinĉjo enlasis ilin, ĉar ili urĝis. Denetoro forturnis malrapide sian kapon de la vizaĝo de Faramiro kaj silente rigardis ilin.

— La unua cirklo de la Urbo brulas, mastro, — ili diris. — Kion vi ordonas? Vi daŭre estas la Mastro kaj Reganto. Ne ĉiu obeas Mitrandiron. Homoj fuĝas de sur la muroj kaj lasas ilin sendefendaj.

— Kial? Kial la stultuloj fuĝas? — diris Denetoro. — Prefere bruliĝi frue ol malfrue, ĉar bruliĝi endas. Reiru al via fajrego! Kaj mi? Mi iros nun al mia sepulta fajro, Al mia sepulta fajro! Neniu tombo por Denetoro kaj Faramiro. Neniu tombo! Neniu longa malrapida mortodormo balzamite. Ni bruligos nin kiel paganaj reĝoj antaŭ ol la unua ŝipo alvelis ĉi tien el la Okcidento. La Okcidento malvenkis. Reiru kaj brulu.

La mesaĝistoj sen riverenco kaj respondo returnis sin kaj forkuris. Tiam Denetoro stariĝis kaj liberigis la febran manon de Faramiro, kiun li antaŭe tenis.

— Li brulas, jam brulas, — li diris malĝoje. — Lia domo diseriĝas. — Poste paŝinte mallaŭte al Grinĉjo, li subenrigardis al li kaj diris:

— Adiaŭ! Adiaŭ, Peregrino, filo de Paladino! Via servado estis mallonga kaj nun proksimiĝas al fino. Mi liberigas vin el tiu malmulto, kiu restas. Iru nun kaj mortu laŭ maniero, kiu ŝajnas al vi preferinda. Kaj kune kun iu ajn, vi volas, eĉ tiu amiko, kies stulteco kondukis vin al tiu ĉi morto. Voku miajn servistojn kaj poste foriru. Adiaŭ!

— Mi ne diros adiaŭ, mastro, — diris Grinĉjo genuante. Poste, subite hobiteca denove, li stariĝis kaj rigardis en la okulojn de la maljunulo. — Mi akceptos vian forpermeson, sinjoro, ĉar mi treege deziras kontakti Gandalfon. Sed li estas nenia stultulo; kaj mi ne pensos pri morto, ĝis li malesperos pri la vivo. Sed el mia voto kaj servado al vi mi ne volas liberiĝi, dum vi vivas. Kaj se ili venos finfine al la Citadelo, mi esperas ĉeesti kaj stari apud vi kaj meriti la armilojn, kiujn vi donis al mi.

— Faru laŭvole, sinjoro duonulo, — diris Denetoro. — Sed mia vivo estas rompita. Voku miajn servistojn!

Li returnis sin al Faramiro.

Grinĉjo forlasis lin kaj vokis la servistojn, kaj tiuj venis: ses viroj el la domanaro, fortaj kaj belaj; tamen ili tremis pro la alvoko. Per kvieta voĉo Denetoro ordonis, ke ili metu varmajn kovrilojn sur la liton de Faramiro kaj

levu ĝin. Tion ili faris, kaj levinte la liton, ili forportis ĝin el la ĉambro. Malrapide ili paŝis por ĝeni la februlon laŭeble plej malmulte, kaj Denetoro apogante sin per bastono sekvis ilin; kaj la lasta iris Grinĉjo.

Eksteren el la Blanka Turego ili marŝis, kvazaŭ al entombigo, eksteren en la mallumon, kie la suprependanta nubo estis sube lumigita je flagroj da malhela ruĝo. Kviete ili trapaŝis la grandan korton, kaj pro vorto de Denetoro ili haltis apud la Velkinta Arbo.

Ĉio silentis, krom militrumoro en la suba Urbo, kaj ili aŭdis malĝojan gutadon de akvo el la mortaj brancoj en la lageton. Poste ili pluiris tra la citadela pordo, kie la sentinelo gapis al ili mire kaj konsternite, kiam ili preterpasis. Turniĝante okcidenten ili venis finfine al pordo en la malantaŭa muro de la sesa cirklo. Tiu nomiĝis Fen Holeno, ĉar ĝi restis ĉiam fermita krom por entombigoj, kaj nur la Mastro de la Urbo rajtis iri tiun vojon, aŭ tiuj, kiuj portis la insignon de la tomboj kaj prizorgis la domojn de la mortintoj. Post la pordo la serpentuma vojo subiris laŭ multaj kurboj ĝis la malvasta tereno sub ombro de krutegaĵo Mindoluino, kie staris la domegoj de la mortintaj Reĝoj kaj de la Regantoj.

Pordisto sidis en dometo apud la vojo, kaj kun timo en la okuloj li elvenis portante lanternon en la mano. Pro ordono de la Mastro li malŝlosis la pordon kaj silente retrosvingis ĝin; kaj ili trapasis, preninte el lia mano la lanternon. Estis mallume sur la grimpa vojo inter antikvaj muroj kaj multpilastraj balustradoj baŭmantaj en la svingiĝantaj lanternoradioj. Iliaj malrapidaj piedoj eĥis, dum ili marŝis suben, suben, ĝis fine ili atingis la Silentan Straton, Rat Dineno, inter palaj kupoloj kaj vakaj haloj kaj bildoj de homoj delonge mortintaj; kaj ili eniris la Domon de la Regantoj kaj demetis sian ŝarĝon.

Tie Grinĉjo, maltrankvile ĉirkaŭrigardante, vidis, ke li troviĝas en larĝa volbita ĉambro, kvazaŭ drapirita per la ombregoj, kiujn la eta lanterno ĵetis sur ĝiajn vualitajn murojn. Kaj malklare vidiĝis multaj tablovicoj, ĉizitaj el marmoro; kaj sur ĉiu tablo kuŝis figuro dormanta, kun kunfalditaj manoj kaj la kapo apogita per ŝtonkuseno. Sed unu tablo proksima staris larĝa kaj senkorpa. Sur tiun pro signo de Denetoro ili kuŝigis Faramiron kaj ties patron unu apud alia, kaj kovris ilin per unusola kovrilo kaj poste staris kun la klinitaj kapoj kvazaŭ funebrantoj apud mortolito. Poste Denetoro parolis mallaŭte.

— Ĉi tie ni atendos. Sed ne alvoku la balzamistojn. Alportu al ni lignon rapidbrulan kaj metu ĝin ĉirkaŭ ni kaj sube; kaj verŝu sur ĝin oleon. Kaj kiam mi ordonos, enŝovu torĉon. Faru tion kaj ne plu alparolu min. Adiaŭ!

— Laŭ via permeso, mastro! — diris Grinĉjo kaj turnis sin kaj fuĝis terurite el tiu morteca domo.

“Kompatinda Faramiro! — li pensis. — Necesas trovi Gandalfon. Kompatinda Faramiro! Tre verŝajne li pli bezonas medicinon ol larmojn. Ho, kie mi trovu Gandalfon? En mezo de l’ aferoj, supozeble, sed al li mankos tempo dediĉota al mortantoj aŭ frenezuloj”.

Ĉeporde li turnis sin al unu el la servistoj, kiuj sentinelis tie.

— Via mastro ne estas normala, — li diris. — Malrapidu! Portu neniom da fajro al tiu ĉi loko, dum Faramiro vivas! Faru nenion, ĝis venos Gandalfo!

— Kiu regas en Minaso Tirit? — la homo respondis. — Ĉu Mastro Denetoro aŭ la Griza Vagulo?

— La Griza Vagulo aŭ neniu, ŝajnas, — diris Grinĉjo kaj rekuris supren laŭ la serpentuma vojo tiel rapide kiel povis porti lin liaj kruroj, preter la mirigita pordisto, eksteren tra la pordo, kaj plu, ĝis li proksimiĝis al la pordo de la Citadelo. La sentinelo alvokis lin, kaj li rekonis la voĉon de Beregondo.

— Kien vi kuras, mastro Peregrino? — li ekkriis.

— Por trovi Mitrandiron.

— La komisioj de la Mastro urĝas kaj devus ne esti malhelpataj de mi, — diris Beregondo, — sed diru al mi rapide, se vi rajtas: kio okazas? Kien iris mia Mastro? Mi ĵus ekdeĵoris, sed mi aŭdis, ke li pasis al la Fermita Pordo, kaj homoj portis antaŭ U Faramiron.

— Jes, — diris Grinĉjo, — al la Silenta Strato. Beregondo klinis sian kapon por kaŝi larmojn.

— Oni diris, ke li mortas, — li ĝemspiris, — kaj jam li mortis.

— Ne, — diris Grinĉjo, — ankoraŭ ne. Kaj eĉ nun eblas malhelpi lian morton, mi opinias. Sed la Mastro de la Urbo, Beregondo, malvenkis antaŭ ol malvenkis lia urbo. Li estas envultita kaj danĝera. — Rapide li sciigis al Beregondo la strangajn vortojn kaj farojn de Denetoro. — Mi devas tuj trovi Gandalfon.

— Do vi devos subeniri al la batalo.

— Mi scias. La Mastro forpermesis min. Sed, Beregondo, se vi povas, faru ion por malhelpi, ke okazu io terura.

— La Mastro ne permesas al portantoj de la nigro kaj arĝento forlasi sian postenon ajnmotive, krom pro lia propra ordono.

— Nu, vi devos elekti inter ordonoj kaj la vivo de Faramiro, — diris Grinĉjo. — Kaj rilate la ordonojn, mi opinias, ke vi havas frenezulon pritraktotan, ne mastron. Mi devas kuri. Mi revenos, se mi povos.

Li plukuris suben, suben al la ekstera urbo. Homoj fuĝantaj de la brulado pasis lin, kaj kelkaj vidinte lian livreon turniĝis kaj kriis, sed li malatentis. Finfine li trapasis la duan pordon, post kiu impetis supren inter

la muroj grandaj fajroj. Tamen ĉio ŝajnis strange silenta. Aŭdiĝis neniuj bruoj, nek batalkrioj, nek armilaj klakadoj. Tiam subite aŭdiĝis terura krio kaj sentiĝis forta skuo, kaj profunda eĥanta muĝo. Devigante sin antaŭen kontraŭ blovo el timo kaj teruriĝo, kiu skuis lin preskaŭ surgenuen, Grinĉjo ĉirkaŭiris angulon kiu malfermiĝis al la larĝa placo malantaŭ la Urba Pordego. Li haltis abrupte. Li jam trovis Gandalfon, sed li kuntiriĝis, kaŭrante en ombro.

Ekde la noktomezo la granda atako daŭris. Tamburoj tondregis. Norde kaj sude trupo post trupo de la malamikoj sturmis la murojn. Venis bestegoj, kiel moviĝantaj domoj en la ruĝa kaj intermita lumo, la *mumakoj* de Harado, kiuj trenis tra la vojetoj inter la fajroj enormajn turojn kaj maŝinojn. Tamen ilia Komandanto ne multe zorgis pri tio, kion ili faris, aŭ kiom el ili estis mortigitaj: ilia celo estis nur provi la forton de la defendado kaj plenokupi multloke la soldatojn de Gondoro. Ĝuste kontraŭ la Pordegon li direktos sian plejan pezon. Malgraŭ ĝia fortiko, konstruita el ŝtalo kaj fero kaj gardita per turoj kaj bastionoj el nevenkebla ŝtono, ĝi estis la ŝlosilo, la plej malforta loko en tiu alta kaj nepenetrebla muro.

La tamburoj ektondris pli laŭte. Fajroj suprensaltis. Grandaj maŝinoj rampis trans la batalkampon; kaj en la mezo estis ramego, arbege granda, centfutojn longa, svingiĝanta sur potencaj ĉenoj. Longe oni forĝis ĝin en la mallumaj forĝejoj de Mordoro, kaj ĝia hida kapo, fandita el nigra ŝtalo, estis forme simila al malsata lupo; sur ĝi kuŝis ruinigaj envultoj. Oni nomis ĝin Grondo, memore pri la Martelo de la Submondo en la pratempo. Trenis ĝin grandaj bestoj, orkoj ĉirkaŭis ĝin, kaj malantaŭe marŝis montaj troloj por manipuli ĝin.

Sed ĉirkaŭ la Pordego rezistado ankoraŭ bravis, kaj tie la kavaliroj el Dol Amroto kaj la plej kuraĝaj el la garnizono staris lastpostene. Sagoj kaj sagetoj falis dense; sieĝturoj krakfalis aŭ subite ekflamis kvazaŭ torĉoj. Antaŭ la muroj ambaŭflanke de la Pordego la teron kovris ruinaĵoj kaj kadavroj de la mortigitoj; tamen pelitaj kvazaŭ freneze ĉiam pli kaj pli alvenis.

Grondo rampis plu. Fajro ne povis difekti ĝian ŝelon; kaj kvankam iu el la bestegoj, kiuj portis ĝin, jen kaj jen freneziĝis kaj vaste dispremis la nenombreblajn orkojn, kiuj gardis ĝin, iliaj korpoj estis forĵetataj de la vojo kaj aliaj prenis ilian lokon.

Grondo rampis plu. La tamburoj sovaĝe tondregis. Sur la montetoj da mortigitoj subite aperis hida figuro: rajdanto, alta, kapuĉita, mantelita en nigro. Malrapide, tramplante la falintojn, li rajdis plu, ne atentante sagojn. Li haltis kaj levis longan palan glavon. Kaj kiam li faris tion, granda timo trafis ĉiujn, tiel defendantojn, kiel malamikojn, kaj la manoj de la homoj

kurbiĝis al iliaj flankoj, kaj neniu pafarko sonoris. Momente ĉio senmoviĝis.

La tamburoj tondregis kaj klakis. Larĝimpete Grondo estis ĵetita antaŭen per grandegaj manoj. Ĝi atingis la Pordegon. Ĝi svingiĝis. Profunda bruego ruliĝis tra la Urbo kiel tondro impetanta en la nuboj. Sed la fera pordego kaj ŝtalaj fostoj eltenis la bategon.

Tiam la Nigra Komandanto stariĝis en la piedingoj kaj laŭte kriis per terura voĉo, parolante en iu forgesita lingvo, vortojn potencajn kaj timigajn, indajn por ŝiri tiel korojn kiel ŝtonojn.

Trifoje li kriis. Trifoje la ramego bruis, kaj subite pro la lasta bato la Pordego de Gondoro rompiĝis. Kvazaŭ trafite de iu eksplodiga sorĉo ĝi disbatiĝis: vidiĝis flagrego de brula fulmo, kaj la pordego falegis frakasite al la tero.

Enrajdis la estro de la nazguloj. Kiel granda nigra figuro antaŭ la fajroj malantaŭe li baŭmis, kreskinta je vasta minaco senesperiga. Enrajdis la estro de la nazguloj sub la arkaĵon, tra kiu ĝis tiam pasis neniu malamiko, kaj fuĝis ĉiuj antaŭ lia vido.

Ĉiuj krom unu. Tie atendante, silenta kaj senmova en la spaco antaŭ la Pordego, sidis Gandalfo sur Ombrofakso: Ombrofakso, la sola inter la ĉevaloj de la tero toleris la teruron, nemoviĝante, firma kiel ĉizita skulptaĵo en Rat Dineno.

— Vi ne povas eniri ĉi tien, — diris Gandalfo, kaj la ombrego haltis. — Reiru al la abismo pretigita por vi! Reiru! Falu en la neniecon, kiu atendas vin kaj vian Mastron! Iru!

La Nigra Rajdanto ĵetis malantaŭen sian kapuĉon, kaj jen! li havis reĝecan kronon; kaj tamen sur neniu videbla kapo ĝi estis metita. La ruĝaj fajroj brilis inter ĝi kaj la mantelitaj ŝultroj vastaj kaj malhelaj. El la buŝo nevidebla venis morteca ridado.

— Maljuna stultulo! — li diris. — Maljuna stultulo! Venis mia horo. Ĉu vi ne rekonas la morton, kiam vi vidas ĝin? Mortu jam kaj malbenu vane!

Dirinte tion li levis alte sian glavon, kaj flamoj trakuris la klingon.

Gandalfo ne moviĝis. Kaj ĝuste tiumomente aŭdiĝis malproksime en iu korto de la Urbo kokeriko de koko. Kriĉe kaj klare ĝi kokerikis, ignorante sorĉadon kaj militon, bonvenigante la matenon, kiu sur la ĉielo forsupre super la ombroj de morto venadis kun la aŭroro.

Kaj kvazaŭ responde aŭdiĝis en foro alia sono. Kornoj, kornoj, kornoj. En la flankoj de malluma Mindoluino ili malklare reeĥis. Grandaj kornoj de la nordo sovaĝe sonoris. Rohano finfine venis.

5

La rajdado de la rohananoj

Estis mallume, kaj Gaja povis vidi nenion, dum li kuŝis sur la tero volvite en lankovrilo; tamen kvankam la nokto estis senaera kaj senventa, ĉie ĉirkaŭe arboj suspiris mallaŭte. Li levis sian kapon. Tiam li aŭdis denove tion: sonon kvazaŭ de sordinitaj tamburoj en la arbarkovritaj montetoj kaj montoŝtupoj. La tamburado subite ĉesis kaj rekomenciĝis ĉe iu alia punkto, jen pli proksima, jen pli fora. Li scivolis, ĉu la gardantoj aŭdis tion.

Tiujn li ne povis vidi, sed li sciis, ke ĉie ĉirkaŭe estis trupoj de la rohananoj. Li povis flari la ĉevalojn en la mallumo, kaj povis aŭdi ties ekmoviĝojn kaj mallaŭtan hufbatadon sur la pinpingla tero. La armeo bivakis en la pinarbaro, kiu densiĝis ĉirkaŭ la signalfajro de Ejlenaĥo, alta monteto elstaranta de la longaj firstoj de la arbaro Druadano, kiu apudis la grandan vojon en orienta Anorieno.

Malgraŭ lacego Gaja ne povis ekdormi. Li jam rajdis dum kvar sinsekvaj tagoj, kaj la ĉiamprofundiĝanta morno malrapide pezis sur lian koron. Li komencis sin demandi, kial li tiom entuziasmis pri la kuniro, dum al li estis proponitaj ĉiaj senkulpigoj, eĉ ordono de la estro, ke li postrestu. Li demandis sin ankaŭ, ĉu la maljuna reĝo estos kolera, se li ekscios, ke lia ordono estas malobeita. Probable, ne. Ŝajne Dernkasko iel interkonsentis kun Elfhelmo, la marŝalo de la *eoredo*, en kiu ili rajdis. Li kaj liaj viroj ŝajnigis ne rimarki Gajan, se tiu alparolis. Li estis kvazaŭ plia pakaĵo portata de Dernkasko. Ankaŭ Dernkasko havigis neniom da konsolo: li malofte eĉ vorton parolis. Gaja sentis sin malgranda, nedezirata kaj sola. La tempo estis zorgoplena, kaj la armeo en danĝero. Ĝi troviĝis je malpli ol unutaga rajdado de la eksteraj muroj de Minaso Tirit, kiuj ĉirkaŭis la urban terenon. Skoltoj estis senditaj antaŭen. Iuj ne revenis. Aliaj haste reveninte raportis, ke la vojo estas forte barita kontraŭ ili. Amaso el la malamikoj bivakis sur ĝi, tri mejlojn okcidente de Amono Din, kaj iu soldataro jam peliĝis laŭ la vojo kaj estis ne pli ol tri leŭgojn for. Orkoj vagadis sur la montoj kaj en la arbaroj apud la vojo. La reĝo kaj Eomero interkonsiliĝis dum la noktaj vaĉoj.

Gaja deziris alparoloton, kaj li pensis pri Grinĉjo. Sed tio nur plifortigis lian maltrankvilon. Kompatinda Grinĉjo, enfermita en granda ŝtona urbo, sola kaj timoplena. Gaja sopiris esti alta rajdanto kiel Eomero kaj povi

sonorigi kornon aŭ simile kaj iri galope al lia savo. Li eksidis, aŭskultante la tamburojn, kiuj denove pulsadis, jam pli proksime. Baldaŭ li aŭdis mallaŭtajn voĉojn kaj ekvidis malbrilajn duonvualitajn lanternojn pasantaj tra la arboj. Viroj proksimaj komencis moviĝi malcerte en la mallumo.

Alta figuro aperis kaj stumblis kontraŭ li, sakrante pri la arbradikoj. Li rekonis la voĉon de Elfhelmo, la estro de la trupo, kun kiu li rajdis.

— Mi ne estas arbradiko, sinjoro, — li diris, — sed kontuzita hobito. Kompense bonvolu sciigi al mi, kio elpaŝas.

— Ĉio ajn kio kapablas tion fari en tiu ĉi diabla senlumo, — respondis Elfhelmo. — Sed mia estro sendis ordonon, ke ni devas teni nin pretaj: eble venos ordonoj pri subita translokiĝo.

— Ĉu do la malamikoj venas? — demandis Gaja netrankvile. — Ĉu estas iliaj tamburoj? Mi komencis supozi, ke mi imagas ilin, ĉar neniu alia ŝajne atentis ilin.

— Ne, ne, — diris Elfhelmo, — la malamikoj estas sur la vojo, ne en la montaro. Vi aŭdas la vozojn, la sovaĝulojn de l' arbaroj: tiamaniere ili interparolas je distanco. Ili plu hantas la arbaron Druadano, laŭdire. Restaĵoj el epoko pli praa ili estas, vivante malmultnombre kaj sekrete, sovaĝaj kaj singardaj kiel la bestoj. Ili ne iras militen kun Gondoro aŭ Markio; sed nun ilin ĉagrenas la mallumo kaj alveno de la orkoj: ili timas, ke la Mallumaj Jaroj eble revenas, kio ŝajnas sufiĉe probabla. Ni estu dankemaj, ke ne nin ili ĉasas: ĉar ili uzas venenajn sagojn, oni diras, kaj ili estas senkompare lertaj pri arbarumado. Sed ili proponis sian servadon al Teodeno. Ĝuste nun unu el iliaj ĉefoj estas kondukata al la reĝo. Tie videblas la lumoj. Tiom mi aŭdis, sed nenion pli. Kaj nun mi devas okupiĝi pri la ordonoj de mia estro.

Li malaperis en la ombrojn. Al Gaja ne plaĉis tiu parolado pri sovaĝuloj kaj venenaj sagoj, sed tute aparte de tio granda timego premis lin. Atendado estis netolerebla. Li sopiris scii, kio estas okazonta. Li stariĝis kaj baldaŭ marŝis singarde, sekvante la lastan lanternon antaŭ ol ĝi malaperis inter la arboj.

Baldaŭ li venis al aperta loko, kie malgranda tendo estis starigita sub granda arbo por la reĝo. Lanternego supre ŝirmita pendis de branĉo kaj dismetis sube palan lumocirklon. Tie sidis Teodeno kaj Eomero, kaj antaŭ ili sur la tero sidis stranga stumpa virformo, nodoza kiel malnova ŝtono, kaj la haroj de ties maldensa barbo dissterniĝis sur lia bulba mentono kiel seka musko. Li estis kurtkrura kaj grasbraka, dika kaj stumpa, vestita nur per herbo ĉirkaŭ la talio. Gaja sentis, ke jam pli frue li vidis lin ie, kaj subite li memoris la Pukel-homojn en Dunharo. Jen estis vivigita unu el tiuj malnovaj skulptaĵoj, aŭ eble kreaĵo rase deveninta dum senfinaj jaroj de la modeloj, uzitaj de la forgesitaj metiistoj antaŭlonge.

Estis silento, dum Gaja rampis pli proksimen, kaj poste la sovaĝulo ekparolis, verŝajne responde al iu demando. Lia voĉo estis profunda kaj guturala, tamen surprize al Gaja li parolis la Komunan Lingvon, kvankam hezite, kaj enmiksiĝis vortoj krudaj.

— Ne, patro de ĉevalrajdantoj, — li diris, — ni ne batalas. Nur ĉasas. Mortigas *gorgunojn* en arbaro, malamegas orkpopolon. Ankaŭ vi malamegas *gorgunojn*. Ni helpos laŭeble. Sovaĝuloj havas orelojn longajn kaj okulojn longajn; konas ĉiujn padojn. Sovaĝuloj vivis ĉi tie antaŭ ol Ŝtondomoj; antaŭ ol Altuloj venis supren el Akvo.

— Sed ni bezonas helpon en batalo, — diris Eomero. — Kiel helpos nin vi kaj via popolo?

— Alportos sciigojn, — diris la sovaĝulo. — Ni rigardos de sur montoj. Ni grimpos montegon kaj subenrigardos. Ŝtonurbo estas fermita. Fajro brulas tie ekstere; jam ankaŭ interne. Vi volas veni tien, ĉu? Do vi devos rapidi. Sed *gorgunoj* kaj homoj el malproksimo, — li gestis per mallonga nodoza brako orienten, — sidas sur ĉevalvojo. Tre multaj, pli ol ĉevalrajdantoj.

— Kiel vi scias tion? — diris Eomero.

La plata vizaĝo kaj malhelaj okuloj de la maljunulo indikis nenion, sed lia voĉo estis senplezure malafabla.

— Sovaĝuloj estas liberaj, sed ne infanecaj, — li respondis. — Mi estas granda gvidanto, Gan-Buri-Gano. Mi kalkulas multajn aferojn: stelojn sur ĉielo, foliojn sur arboj, homojn en mallumo. Vi havas dudekon da dudekoj kalkulitan dekoble kaj kvinoble. Ili havas pli. Batalego, kaj kiu venkos? Kaj multe pli ĉirkaŭmarŝas la murojn de ŝtondomoj.

— Ve! Li parolas elstare sagace, — diris Teodeno. — Kaj niaj skoltoj diras, ke ili dismetis tranĉeojn kaj fostojn trans la vojon. Ni ne povos forviŝi ilin per subita sturmo.

— Kaj tamen necesas urĝa hasto, — diris Eomero. — Mundburgo brulas!

— Permesu, ke Gan-Buri-Gano finparolu! — diris la sovaĝulo. — Pli ol unu vojon li konas. Li kondukos vin laŭ pado kie ne troviĝas truoj, neniuj *gorgunoj* marŝas, nur Sovaĝuloj kaj bestoj. Multaj padoj estis kreitaj kiam ŝtondomuloj pli fortis. Ili tranĉis montojn kiel ĉasistoj tranĉas bestviandon. Sovaĝuloj pensas, ke ili manĝis ŝtonojn por sin nutri. Ili trairis Druadanon al Rimono kun grandaj furgonoj. Ne plu ili iras. Pado estas forgesita, sed ne de la Sovaĝuloj. Trans la monton kaj malantaŭ monto ĝi kuŝas plu sub herboj kaj arboj, tie malantaŭ Rimono kaj suben ĝis Dino, kaj fine denove al rajdista vojo. Sovaĝuloj montros al vi tiun padon. Poste vi mortigos *gorgunojn* kaj forpelos fian malhelon per hela fero, kaj Sovaĝuloj povos

ekdormi denove en la sovaĝaj arbaroj.

Eomero kaj la reĝo kunparolis en sia propra lingvo. Finfine Teodeno sin turnis al la sovaĝulo.

— Ni akceptos vian proponon, — li diris. — Ĉar, kvankam ni postlasos amason da malamikoj, kiel gravas? Se la Ŝtonurbo malvenkos, al ni tiam ne eblos reiro. Se ĝi estos savita, tiam la orkarmeo estos izolita. Se vi estos fidela, Gan-Buri-Gano, tiam ni riĉe kompensos vin, kaj por ĉiam vi posedos la amikecon de Markio.

— Mortintoj ne amikas al vivantoj kaj donas al ili neniom da donacoj, — diris la sovaĝulo. — Sed se vi vivos post la mallumo, tiam lasu la Sovaĝulojn neĝenataj en la arbaro kaj ne ĉasu ilin kvazaŭ bestojn plu. Gan-Buri-Gano ne gvidos vin en kaptilon. Li iros mem kun la patro de ĉevalrajdantoj, kaj se li misgvidos vin, vi lin mortigos.

— Estu tiel! — diris Teodeno.

— Kiom longe necesos preterpasi la malamikojn kaj reveni al la vojo? — demandis Eomero. — Ni devos iri marŝtakte, se vi gvidos nin; kaj mi ne dubas, ke la vojo estas mallarĝa.

— Sovaĝuloj rapide paŝas, — diris Gano. — Vojo larĝas sufiĉe por kvar ĉevaloj tie en Ŝtonfurgona Valo, — li gestis suden per la mano, — sed mallarĝa komence kaj fine. Sovaĝulo povus marŝi de ĉi tie ĝis Dino inter sunleviĝo kaj tagmezo.

— Do ni devas kalkuli minimume sep horojn por la avangardo, — diris Eomero; — sed ni devas supozi prefere iajn dek horojn por la tuto. Neantaŭviditaj okazaĵoj eble malhelpos nin, kaj se nia armeo estos disspacigita, necesos longa tempo por reordigi ĝin, kiam ni eliros el la montaro. Kioma horo nun estas?

— Kiu scias? — diris Teodeno. — Nun komplete noktas.

— Estas komplete mallume, sed ne komplete nokte, — diris Gano.

— Kiam venas la suno, ni sentas ĝin, eĉ kiam ĝi estas kaŝita. Jam ĝi grimpas super la Orientajn Montojn. Malfermiĝas la tago sur la ĉielkampoj.

— Do ni devas ekvojaĝi kiel eble plej baldaŭ, — diris Eomero. — Eĉ tiel ni ne rajtas esperi pri helpo al Gondoro hodiaŭ.

Gaja ne atendis por aŭdi pli, sed forglitis por pretiĝi antaŭ alvoko ekmarŝi. Jen estis la lasta stadio antaŭ batalo. Al li ne ŝajnis probable, ke multaj el ili travivos ĝin. Sed li pensis pri Grinĉjo kaj la flamoj en Minaso Tirit, kaj li sufokis sian propran antaŭtimon.

Tiutage ĉio iris glate, kaj ili nenion vidis nek aŭdis rilate malamikojn, kiuj atendis por embuski ilin. La sovaĝuloj dismetis ŝirmaĵon da singardaj ĉasistoj, tiel ke neniu orko aŭ vaganta spiono eksciu pri la moviĝado en la montaro. La lumo eĉ pli malfortiĝis, dum ili proksimiĝis al la sieĝata urbo,

kaj la rajdistoj pasis longspalire kiel malhelaj ombroj de homoj kaj ĉevaloj. Ĉiun trupon gvidis sovaĝula arbaristo; sed maljuna Gano marŝis apud la reĝo. La komenco estis malpli rapida, ol oni esperis, ĉar necesis tempo por ke la rajdistoj, marŝante kaj kondukante siajn ĉevalojn, trovu padojn tra la dense arbkovritaj firstoj malantaŭ sia tendaro kaj suben en la kaŝitan Ŝtonfurgonan Valon. Estis frue posttagmeze, kiam la avangardo alvenis larĝajn grizajn densejojn etendiĝantaj post la orientan flankon de Amono Din, kaj maskantaj larĝan breĉon en la montolinio, kiu etendiĝis orienten kaj okcidenten de Nardolo ĝis Dino. Tra la breĉo la forgesita furgonvojo antaŭ longe subeniris, reen al la ĉefa ĉevalvojo el la Urbo tra Anorieno; sed jam dum multaj homvivoj arboj libere pritraktis ĝin, kaj ĝi malaperis, frakasita kaj entombigita sub la folioj de sennombraj jaroj. Sed la densejoj proponis al la rajdistoj ties lastan esperon pri ŝirmado antaŭ ol ili iros en senkaŝan batalon; ĉar post ili kuŝis la vojo kaj la ebenaĵoj de Anduino, dum oriente kaj sude la deklivoj estis nudaj kaj rokecaj, dum la torditaj montetoj kunpremiĝis kaj supreniris, bastiono post bastiono, al la granda masivo kaj ŝultroj de Mindoluino.

La unua trupo estis haltigita kaj kiam la sekvantoj spaliris supren el la trogo de la ŝtonfurgona Valo, ili dismetiĝis kaj pasis al bivakejoj sub la grizaj arboj. La reĝo alvokis la komandantojn al konsiliĝo, Eomero dissendis skoltojn por spioni la vojon; sed maljuna Gano skuis sian kapon.

— Ne bone sendi rajdistojn, — li diris. — Sovaĝuloj jam vidis ĉion videblan en la malutila aero. Ili venos baldaŭ por paroli al mi ĉi tie.

La komandantoj venis; kaj poste el inter arboj singarde alŝteliĝis aliaj pukel-figuroj tiel similaj al maljuna Gano, ke Gaja apenaŭ povis disdistingi ilin. Ili parolis al Gano en stranga gorĝsona lingvo.

Baldaŭ Gano turnis sin al la reĝo.

— Sovaĝuloj diras multajn aferojn, — li diris. — Unue, estu singardaj! Daŭre multaj homoj en bivakejo post Dino, je unuhora marŝado tiudirekte, — li svingis sian brakon okcidenten al la nigra signalfajro. — Sed neniu videbla inter ĉi tie kaj novaj muroj de Ŝtonpopolo. Multaj okupiĝas tie. Muroj staras ne plu: *gorgunoj* faligis ilin per tertondro kaj per klaboj el nigra fero. Ili estas sensuspektaj kaj ne ĉirkaŭrigardas. Ili supozas, ke iliaj amikoj sentinelas ĉiujn vojojn!

Dirinte tion la maljuna Gano eligis strangan gargarsonon, kaj ŝajne li ridis.

— Bona novaĵo! — kriis Eomero. — Eĉ en tiu ĉi malhelo espero denove brilas. La lertaĵoj de nia Malamiko ofte servas nin spite al li. La damninda mallumo mem estis mantelo por ni. Kaj nun, avidante detrui Gondoron kaj deĵeti ĝin ŝtonpostŝtone, liaj orkoj forigis mian plej grandan timon. La

ekstera muro estus daŭra baraĵo kontraŭ ni. Sed jam ni povos trasturmi ĝin — se ni iam povos atingi tiel proksimen.

— Denove mi dankas vin, Gan-Buri-Gano de l' arbaro, — diris Teodeno. — Bona fortuno akompanu vin pro viaj informoj kaj konsiloj!

— Mortigu *gorgunojn*! Mortigu orkan popolon! Neniuj aliaj vortoj plaĉas al la Sovaĝuloj, — respondis Gano. — Forpelu fetoran aeron kaj mallumon per hela feraĵo!

— Por fari tion ni longe rajdadis, — diris la reĝo, — kaj ni klopodos pri tio. Sed kion ni plenumos, tion nur morgaŭo montros.

Gan-Buri-Gano kaŭris kaj tuŝis la teron per sia korneca frunto kiel signon de adiaŭo. Poste li stariĝis kvazaŭ por foriri. Sed subite li haltis rigardante supren, kvazaŭ surprizita arbara besteto snufanta fremdan aeron. Lumo ekaperis en liaj okuloj.

— Vento ŝanĝiĝas! — li kriis, kaj tuj, palpebrumrapide, aŭ tiel ŝajnis, li kaj liaj kunuloj malaperis en la malhelejon, neniam denove vidotaj de iu ajn rohana rajdisto. Post nelonge en la orienta malproksimo denove pulsadis la mallaŭtaj tamburoj. Tamen al neniu koro en la tuta armeo venis timo, ke la sovaĝuloj malfidelas, kiel ajn ili aspektis strangaj kaj nebelaj.

— Plia gvidado ne necesas por ni, — diris Elfhelmo; — ĉar en la armeo estas rajdistoj, kiuj subenrajdis al Mundburgo dum tagoj de paco. Inkluzive de mi. Kiam ni alvenos la vojon, ĝi devios suden, kaj kuŝos antaŭ ni ankoraŭ sep leŭgoj antaŭ ol ni atingos la muron de la urba tereno. Laŭ la plejparto de tiu vojo troviĝas multe da herbo ambaŭflanke. Per tiu etendaĵo la mesaĝistoj de Gondoro antaŭvidis progresi plej rapide. Ni povos rajdi sur ĝi rapide kaj sen granda bruo.

— Do tial ke antaŭ ni estas danĝeraj faroj, kaj ni bezonos nian tutan forton, — diris Eomero, — mi konsilas, ke ni nun ripozu kaj ekiru de ĉi tie dumnokte, kaj tiel kalkulu nian ekiron, ke ni alvenu la kampojn, kiam la morgaŭo estos maksimume hela, aŭ kiam nia estro signalos.

La reĝo konsentis pri tio, kaj la komandantoj foriris. Sed baldaŭ Elfhelmo revenis.

— La skoltoj trovis nenion raportendan post la griza arbaro, moŝto, — li diris, — krom nur du virojn mortintajn kaj du mortajn ĉevalojn.

— Nu? — diris Eomero. — Kial gravas?

— Tial, moŝto: ili estis mesaĝistoj de Gondoro; Hirgono estis unu el ili, eble. Nu, lia mano plu tenis la Ruĝan Sagon, sed lia kapo estis forhakita. Kaj krome jeno: laŭ la postsignoj ŝajnas, ke ili fuĝis *okcidenten*, kiam ili pereis. Laŭ mia interpreto, ili trovis la malamikojn jam sur la ekstera muro, aŭ tiun atakantaj, kiam ili revenis; kaj tio nepre okazis antaŭ du noktoj, se ili uzis laŭ sia kutimo freŝajn ĉevalojn el la stafetaj stacioj. Ili ne povis atingi la

Urbon kaj returniĝis.

— Ve! — diris Teodeno. — Sekve Denetoro ne ricevis informojn pri nia rajdado kaj malesperos pri nia alveno.

— *Neceso prokraston ne toleras, tamen pli bone estas malfrue ol neniam*, — diris Eomero. — Kaj eble en la nuna epoko tiu malnova proverbo pruviĝos pli trafa ol iam antaŭe, de kiam la homoj parolas buŝe.

Estis nokte. Ambaŭflanke de la vojo la armeo de Rohano moviĝis silente. Nun la vojo ĉirkaŭante la limojn de Mindoluino turniĝis suden. Malproksime kaj preskaŭ rekte antaŭe vidiĝis ruĝa ardo sub la nigra ĉielo kaj la flankoj de la montego baŭmis malhele antaŭ ĝi. Ili proksimiĝis al Ramaso de Pelenoro, sed ankoraŭ ne tagiĝis.

La reĝo rajdis meze de la plej antaŭa trupo, kun sia domanaro ĉirkaŭe. La *eoredo* de Elfhelmo sekvis; kaj nun Gaja rimarkis, ke Dernkasko rezignis sian lokon kaj en la mallumo moviĝis seninterrompe antaŭen, ĝis fine li rajdis ĝuste malantaŭ la reĝa gardistaro. Okazis haltigo. Gaja aŭdis voĉojn antaŭe, kiuj mallaŭte interparolis. Revenis skoltoj, kiuj riskis antaŭen preskaŭ ĝis la muro. Ili alvenis la reĝon.

— Troviĝas grandaj fajroj, moŝto, — diris unu el ili. — La Urbon ĉirkaŭringas fajro, kaj la kampo plenplenas de malamikoj. Sed ĉiuj ŝajnas direktitaj al la atako. Laŭ mia plej preciza takso malmultaj restas sur la ekstera muro, kaj tiuj malatentas, okupate pri detruado.

— Ĉu vi memoras la vortojn de la sovaĝulo, mastro? — diris alia skolto. — Dumpace mi loĝas sur aperta montetaro. Vidfaro estas mia nomo, kaj ankaŭ al mi la aero portas mesaĝojn. Jam la vento turniĝas. Venas spiro el la sudo; en ĝi estas marodoro, kvankam malforta. La mateno alportos novajn aferojn. Super la fumo estos aŭrore, kiam vi trapasos la muron.

— Se vi parolas verece, Vidfaro, vivu post tiu ĉi tago dum jaroj da benateco! — diris Teodeno. Li sin turnis al siaj proksimaj domanoj, kaj li parolis nun per klara voĉo tiel, ke ankaŭ multaj rajdistoj en la unua *eoredo* aŭdis lin:

— Jam venis la horo, rajdistoj de Markio, filoj de Eorlo! Antaŭ vi estas malamikoj kaj fajro, kaj fore malantaŭe estas viaj hejmoj. Tamen malgraŭ tio, ke vi batalos sur fremda kampo, la gloro, kiun vi rikoltos tie estos poreterne via. Ĵurojn vi donis: nun plenumu ĉiujn, al la reĝo kaj lando kaj amikeca kunligo!

Viroj batis ŝildojn per lancoj.

— Eomero, mia filo! Vi estras la unuan *eoredon*, — diris Teodeno, — kaj ĝi sekvos la reĝan standardon en la mezo. Elfhelmo, gvidu vian trupon dekstren, kiam vi trapasos la muron. Kaj Grimboldo gvidos la sian maldekstren. La ceteraj trupoj malantaŭe sekvu tiujn tri avangardajn laŭ la

eblecoj. Ataku kie ajn la malamikoj grupiĝas. Aliajn planojn ni ne povas fari, ĉar ni ankoraŭ ne scias, kiel statas la aferoj sur la kampo. Jam for, kaj timu neniun mallumon!

La avangarda trupo forrajdis kiel eble plej rapide, ĉar ankoraŭ plu profundis la malhelo, kia ajn estis la ŝanĝiĝo antaŭdirita de Vidfaro. Gaja rajdis post Dernkasko, kroĉiĝante per la maldekstra mano, dum per la dekstra li klopodis liberigi sian glavon en ties ingo. Li jam sentis amare la veron de la vortoj de l' maljuna reĝo: *en tia batalo, kion vi farus, Gajadoko*? "Ĝuste tion ĉi, — li pensis: — ŝarĝi rajdiston, kaj esperi maksimume pri restado sur mia sidloko kaj ne ĝismorte batiĝi per galopantaj hufoj!"

Temis pri ne pli ol unu leŭgo ĝis kie pli frue staris la eksteraj muroj. Baldaŭ ili venis al tiuj; tro baldaŭ, laŭ Gaja. Sovaĝaj krioj eksplodis, kaj okazis iom da armila klakado, sed tio estis mallonga. La orkoj okupitaj ĉirkaŭ la muroj estis malmultaj kaj konsternitaj, kaj ilin oni rapide mortigis aŭ forpelis. Antaŭ la ruinigita norda pordego en Ramaso denove haltis la reĝo. La unua *eoredo* viciĝis malantaŭ li kaj ĉirkaŭ li ambaŭflanke. Dernkasko restis proksima al la reĝo, kvankam la trupo de Elfhelmo troviĝis dekstre malproksime. La viroj de Grimboldo turniĝis flanken kaj venis ĝis breĉego en la muro pli oriente.

Gaja gapis de post la dorso de Dernkasko. En la foro, eble je dek mejloj aŭ pli, estis granda brulado, sed inter ĝi kaj la rajdistoj flamis fajrolinioj en larĝa krescento, plej proksime je leŭga distanco. Li povis vidi malmulte pli sur la malhela ebenaĵo, kaj ĝis tiam li vidis nek esperon pri mateno, nek sentis ajnan venton, ŝanĝitan aŭ neŝanĝitan.

La armeo de Rohano silente pluiris sur la kampon de Gondoro, enverŝiĝante malrapide sed seninterrompe, kvazaŭ leviĝanta tajdo tra breĉoj en ŝtonmuro, kiun la homoj supozis sekura. Sed la menso kaj volo de la Nigra Komandanto direktiĝis tute al la pereanta urbo, kaj ĝis tiam ne atingis lin sciigo avertanta, ke liaj planoj estas malperfektaj.

Post kelka tempo la reĝo kondukis siajn virojn iom orienten, por interveni inter la sieĝaj fajroj kaj la eksteraj kampoj. Ankoraŭ ili estis nedefiitaj, kaj ankoraŭ Teodeno nenion signalis. Finfine li denove haltis. La Urbo estis jam pli proksima. En la aero estis brulodoro kaj vera ombro de la morto. La ĉevaloj estis maltrankvilaj. Sed la reĝo sidis sur Neĝkolaĵo senmove, rigardante la agonion de Minaso Tirit, kvazaŭ subite trafita je angoro, aŭ je timego. Li ŝajnis ŝrumpi, venkita de maljunaĝo. Gaja mem sentis kvazaŭ lin ŝarĝus granda pezo de hororo kaj dubo. Lia koro batis malrapide. La tempo ŝajnis ŝvebi en malcerteco. Ili venis tro malfrue! Tro malfrue estis pli malbone ol neniam! Eble Teodeno ŝanceliĝos, klinos sian maljunan kapon, turniĝos, forŝteliĝos por sin kaŝi en la montaro.

Tiam Gaja subite sentis fine kaj eksterdube ŝanĝiĝon. Vento blovis al lia vizaĝo! Lumo ekbriletis. Tre, tre fore en la sudo la nuboj malklare videblis kiel distaj grizaj formoj, alruliĝantaj, drivaj: post ili kuŝis mateno.

Sed tiumomente okazis flagro, kvazaŭ fulmo suprensaltus de la tero sub la Urbo. Dum brula sekundo ĝi staris fore blindigante en nigro kaj blanko, ĝia plej supra turo kiel ekbrila kudrilo; kaj poste, kiam la mallumo revenis, aŭdiĝis ruliĝante tra la kampoj laŭta *bu-u-u-um*.

Je tiu sono la kurbiĝanta figuro de l' reĝo subite rektiĝis. Alta kaj fiera li ŝajnis denove; kaj stariĝante sur la piedingoj li kriis laŭte, pli klare ol iu ajn ĉeestanto iam antaŭe aŭdis mortemulon:

Leviĝu, rajdistoj de Teodeno!
Vekiĝas fifaroj: fajro kaj buĉo!
Lancoj skuiĝos, ŝildoj splitiĝos,
ruĝos glavtag' antaŭ suna leviĝo!
Rajdu jam, rajdu jam! Rajdu Gondoren!

Poste li kaptis grandan kornon de sia standardisto Gutlafo, kaj blovis per ĝi tian noton, ke ĝi dissplitiĝis. Kaj tuj ĉiuj kornoj en la armeo aŭdiĝis muzike, kaj la sonorado de la kornoj de Rohano tiuhore similis ŝtormon sur la ebenaĵo kaj tondron en la montaro.

Rajdu jam, rajdu jam! Rajdu Gondoren!

Subite la reĝo kriis al Neĝkolaĵo kaj la ĉevalo saltis antaŭen. Post li flirtis en la vento lia standardo, blanka ĉevalo sur kampo verda, sed li pli rapidis ol ĝi. Post li tondris la kavaliroj de lia domo, sed li ĉiam antaŭis ilin. Eomero rajdis tie kun la blanka ĉevalvosto sur la kasko flosanta pro lia rapido, kaj la vicoj de la unua *eoredo* muĝis kiel ondego ŝaŭmanta surborden, sed Teodeno estis neatingebla. Sorĉita li ŝajnis, aŭ la batalfuriozo de liaj prapatroj trakuris kiel freŝa fajro en liaj vejnoj, kaj lin subtenis Neĝkolaĵo kvazaŭ dion pratempan, samkiel Oromeon la Grandan en la batalo de la Valaroj, kiam la mondo estis juna. Lia ora ŝildo estis nekovrita, kaj jen! ĝi brilis kiel bildo de la suno, kaj la herbo ekflagris verde ĉirkaŭ la piedoj de lia rajdbesto. Ĉar venis la mateno, mateno kaj vento de sur la maro; kaj mallumo estis forigita, kaj la armeoj de Mordoro ululis, kaj timego trafis ilin, kaj ili fuĝis kaj mortis, kaj la hufoj koleraj trarajdis ilin. Kaj tiam la tuta armeo de Rohano ekkantis, kaj ili kantis, dum ili mortigis, ĉar la ĝojo de batalo regis ilin, kaj la bruo de ilia bela kaj terura kantado atingis eĉ la Urbon.

6

La batalo sur la Kampoj Pelenoraj

Sed tiu estis nek ĉeforko nek bandito, kiu gvidis la atakon kontraŭ Gondoro. La malhelo tro frue rompiĝis, antaŭ la dato difinita por tio fare de lia Mastro; la sorto provizore perfidis lin, kaj la mondo turniĝis kontraŭ lin; venko forglitis el lia kroĉo ĝuste kiam li etendis la manon por ekkapti ĝin. Sed longa estis lia brako. Li ankoraŭ komandis, manipulante grandajn potencojn. Reĝo, Ringofantomo, Estro de la nazguloj, li posedis multajn armilojn. Li forlasis la Pordegon kaj malaperis.

Teodeno, Reĝo de Markio, alvenis la vojon inter la Pordego kaj la Rivero, kaj li turnis sin al la Urbo, kiu jam proksimis malpli ol unu mejlon. Li malpliigis iomete sian rapidecon, serĉante novajn malamikojn, kaj liaj kavaliroj alvenis ĉirkaŭ lin, kaj Dernkasko estis kun ili. Antaŭe, pli proksime al la muroj, la viroj de Elfhelmo troviĝis inter la sieĝiloj, hakante, mortigante, pelante malamikojn en la fajroputojn. Preskaŭ la tuta norda duono de Pelenoro estis konkerita, kaj tie brulis tendaroj, orkoj fuĝis al la Rivero kiel gregoj antaŭ la ĉasantoj; kaj la rohananoj iris tien-reen laŭvole. Sed ili ankoraŭ ne venkis la sieĝon, nek konkeris la Pordegon. Antaŭ ĝi staris multaj kontraŭuloj, kaj sur la fora duono de la ebenaĵo estis aliaj armeoj ankoraŭ ne kontraŭbatalitaj. Sude post la vojo kuŝis la ĉefarmeo de la haradanoj, kaj tie la rajdistoj ĉirkaŭis la standardon de sia ĉefo. Kaj tiu elrigardis, kaj en la burĝonanta lumo li vidis la standardon de la reĝo, kaj ke ĝi estas treege antaŭ la batalo kaj ĉirkaŭas ĝin malmultaj homoj. Tiam plenigis lin ruĝa kolerego kaj li kriis laŭte kaj vidigante sian flagon, nigran serpenton sur skarlato, li alvenis kontraŭ la blankan ĉevalon kaj la verdon kun amasego da viroj; kaj la elingigo de la sabroj de la suduloj similis ekbrilon de steloj.

Tiam Teodeno konsciiĝis pri li kaj ne volis atendi lian atakon, sed kriinte al Neĝkolaĵo li senrezerve sturmis por saluti lin. Granda estis la bruo de ilia renkontiĝo. Sed la blanka furiozo de la norduloj brulis pli arde, kaj pli lerta estis ilia kavalireco pri lancoj longaj kaj avidaj. Malpli multaj ili estis, sed ili fendis la sudulojn kiel fulmofajro en arbaro. Senhalte tra la amaso premis sin Teodeno, filo de Tengelo, kaj lia lanco splitiĝis, kiam li deĵetis ilian ĉefon. Elingiĝis lia glavo, kaj li spronis al la standardo, hakis foston kaj portanton; kaj la nigra serpento falis. Poste la nemortigita restaĵo de ilia rajdistaro turniĝis kaj fuĝis foren.

Sed jen! subite en mezo de la reĝa gloro, lia ora ŝildo malbrilis. La nova mateno forviŝiĝis sur la ĉielo. Mallumiĝis ĉirkaŭ li. Ĉevaloj baŭmis kaj kriĉis. Viroj elseligitaj kaŭris sur la tero.

— Al mi! Al mi! — kriis Teodeno. — Supren Eorlidoj! Timu neniun malhelon! — Sed Neĝkolaĵo terurite staris alte, batante la aeron, kaj poste kun alta kriĉo falegis flanken: nigra sago trapikis ĝin. La reĝo falis sub ĝi.

La ombrego malsupreniĝis kvazaŭ falanta nubo. Kaj jen! ĝi estis kreaĵo flugilhava: se birdo, do pli granda ol ĉiuj ceteraj birdoj, kaj ĝi estis nuda, kaj havis nek pikilojn, nek plumojn, kaj ĝiaj larĝaj flugiloj estis kvazaŭ araneaĵoj da felo inter fingroj kornozaj; kaj ĝi fetoris. Kreaĵo el mondo pli antikva ĝi eble estis, kies specio, postrestante en forgesitaj montoj malvarmaj sub la luno, postvivis sian epokon, kaj en hida nestejo generis ĉi lastan pretertempan idaron, taŭgan por misaĵoj. Kaj la Malhela Mastro prenis tiun kaj nutris ĝin per abomena viando, ĝis ĝi kreskis pli granda ol mezuriĝis ĉiuj aliaj flugantaĵoj; kaj tiam li donis ĝin al sia servisto, ke ĝi estu ties rajdbesto. Suben, suben ĝi venis, kaj poste, faldinte siajn fingroaraneaĵojn, ĝi eligis raŭkan krion, kaj sidiĝis sur la kadavro de Neĝkolaĵo, kroĉante ĝin per siaj ungegoj, kurbigante sian longan nudan kolon.

Sur ĝi sidis figuro, nigre mantelita, enorma kaj minaca. Kronon el ŝtalo tiu portis, sed inter ĝia rando kaj vesto videblis nenio, krom nur terura brilo de okuloj: la Mastro de la Nazguloj. Al la aero li reiris, alvokinte sian rajdbeston antaŭ ol la malhelo foriĝis, kaj nun li revenis, alportante ruinon, malesperigante esperon, kaj venkon mortkondamnante. Grandan nigran madzon li svingis.

Sed Teodeno ne estis tute forlasita. Liaj domaj kavaliroj kuŝis ĉirkaŭ li mortigitaj, aŭ estis portitaj foren regite per la frenezeco de siaj rajdbestoj. Tamen ankoraŭ tie staris unu: la juna Dernkasko, fidela pli ol tima; kaj li ploris, ĉar li amis sian estron kiel patron. Tra la tuta sturmado Gaja estis portita sendamaĝe malantaŭ li, ĝis venis la Ombrego; kaj tiam forĵetis ilin terurita Ventfola kaj nun kuradis frenezece sur la ebenaĵo. Gaja rampis kvarmembre kvazaŭ obtuzigita besto, kaj tiom lin regis timego, ke li blindis kaj vomemis.

"Servisto reĝa! Servisto reĝa! — lia koro kriis interne. — Vi devas resti ĉe li. *Kvazaŭ patro vi estos al mi*, vi diris". — Sed lia volo ne respondis, kaj lia korpo skuiĝis. Li aŭdacis nek malfermi siajn okulojn nek rigardi supren.

Tiam tra la mensa nigro ŝajnis al li, ke li aŭdas Dernkaskon paroli; tamen jam la voĉo ŝajnis stranga, memoriganta pri alia voĉo, kiun li iam konis.

— For, fia vivkadavro, mastro de kadavraĵoj! Lasu en paco la

mortintojn!

Malvarma voĉo respondis:

— Ne venu inter la nazgulo kaj ties predo! Aŭ viavice vin li ne mortigos. Li forportos vin al la domoj de lamentado, preter ĉia mallumo, kie via karno estos vorita kaj via ŝrumpinta menso lasiĝos nuda antaŭ la Okulo Senpalpebra.

Glavo sonoris elingigita.

— Faru laŭvole; sed tion mi malhelpos, se mi povos.

— Ĉu malhelpi? Stultulo. Neniu viro vivanta kapablas malhelpi min!

Tiam Gaja aŭdis la plej strangan el ĉiuj sonoj en tiu horo. Ŝajnis, ke Dernkasko ridas, kaj la klara voĉo estis kiel la sonoro de ŝtalo.

— Sed viro vivanta mi ne estas! Vi rigardas virinon. Eovina mi estas, filino de Eomundo. Vi staras inter mi kaj mia mastro kaj parenco. Foriru, se vi ne estas senmorta! Ĉar ĉu vivanton aŭ sorĉan vivmortinton, mi bategos vin, se vi tuŝos lin.

La flugilhava kreaĵo kriĉis al ŝi, sed la Ringofantomo nenion respondis kaj silentis, kvazaŭ subite dubanta. Mirego momente venkis la timon de Gaja. Li malfermis siajn okulojn kaj la malhelo forviŝiĝis de ili. Je kelkaj paŝoj de li sidis la bestego, kaj ĉio ĉirkaŭ ĝi ŝajnis malluma, kaj super ĝi baŭmis la Nazgulestro kvazaŭ ombro malespera. Iom maldekstre fronte al ili staris ŝi, kiun li nomis Dernkasko. Sed la kasko de ŝia sekreteco jam forfalis, kaj ŝia bela hararo, liberigita de ligaĵoj, ekbrilis pale ora sur ŝiaj ŝultroj. Ŝiaj okuloj grizaj kiel la maro estis malmolaj kaj minacaj, kaj tamen sur ŝiaj vangoj estis larmoj. Glavo estis en ŝia mano, kaj ŝi levis sian ŝildon antaŭ la hororaj okuloj de sia malamiko.

Eovina tiu estis, kaj ankaŭ Dernkasko. Ĉar en la menso de Gaja fulmis memoro pri tiu vizaĝo, kiun li vidis dum la rajdado el Dunharo: vizaĝo de iu, kiu iras serĉante la morton, ĉar mankis espero. Kompato plenigis lian koron kaj ankaŭ mirego, kaj subite vekiĝis la lante-ĉenda kuraĝo de lia raso. Li pugnigis sian manon. Ŝi ne mortu, tiom bela, tiom senespera! Almenaŭ ŝi ne mortu sola, nehelpite.

La vizaĝo de ilia malamiko ne estis turnita al li, tamen li apenaŭ aŭdacis moviĝi, pro timo ke la mortigaj okuloj trafu lin. Malrapide, malrapide li komencis rampi flanken; sed la Nigra Komandanto, atentante dubeme kaj malice la virinon antaŭ si, ne pli rimarkis lin ol vermon en koto.

Subite la bestego batis siajn hidajn flugilojn, kaj ties vento estis fetora. Denove ĝi saltis en la aeron kaj poste falis rapide al Eovina, ŝrikante, frapante per la beko kaj ungoj.

Tamen ŝi daŭre ne paliĝis, rohana junulino, ido de reĝoj, svelta tamen ŝtalklingeca, belega tamen terura. Per rapida bato ŝi frapis, sperte kaj

mortige. La etenditan kolon ŝi disduigis, kaj la hakita kapo falis kvazaŭ ŝtono. Ŝi retrosaltis kiam la figuro falegis pereinte, kun larĝaj flugiloj dismetitaj, kolapsinte sur la tero; kaj samtempe kun la falo forpasis la ombro. Lumo ĉirkaŭis ŝin, kaj ŝiaj haroj helis sub la sunleviĝo.

El la ruino leviĝis la Nigra Rajdanto, alta kaj minaca, baŭmanta super ŝi. Kun krio malamoplena, kiu pikis la orelojn mem venene, li faligis sian madzon. Ŝia ŝildo estis diserigita, kaj ŝia brako estis rompita; ŝi stumble surgenuiĝis. Li klinis sin nubece super ŝin, kaj liaj okuloj ekbrilis; li levis sian madzon mortigocele.

Sed subite ankaŭ li stumblis antaŭen kun amara dolorkrio, kaj lia bato maltrafis, frapegante la teron. La glavo de Gaja trapikis lin de malantaŭe, ŝire penetrinte la nigran mantelon kaj pasante supren sub la maŝkiraso, trafis la tendenon malantaŭ lia fortega genuo.

— Eovina! Eovina! — kriis Gaja. Tiam ŝanceliĝe, baraktante por stariĝi, per sia lasta forto ŝi enbatis sian glavon inter la kronon kaj la mantelon, dum la ŝultregoj kliniĝis antaŭ ŝi. La glavo rompiĝis flagre je multaj eroj. La krono forruliĝis tintante. Eovina falis antaŭen sur sian falintan malamikon. Sed jen! la mantelo kaj la maŝkiraso estis malplenaj. Senforme ili nun kuŝis sur la tero, ŝiritaj kaj ĉifitaj; kaj krio leviĝis en la tremegan aeron, kaj velkis ĝis akra ululo, forirante sur la vento, voĉo senkorpa kaj maldensa formortis, kaj estis englutita, kaj neniam plu aŭdiĝis en tiu epoko de la mondo.

Kaj tie staris la hobito Gajadoko meze de la mortigitoj, palpebrumante kvazaŭ strigo en taglumo, ĉar blindigis lin larmoj; kaj tra nebuleto li rigardis la blondan kapon de Eovina, dum ŝi kuŝis kaj ne moviĝis; kaj li rigardis la vizaĝon de la reĝo, falinta meze de sia gloro. Ĉar Neĝkolaĵo agoniante forruliĝis de li denove; tamen ĝi estis la missorto de sia mastro.

Gaja kliniĝis kaj levis lian manon por ĝin kisi, kaj jen! Teodeno malfermis siajn okulojn, kaj ili estis klaraj, kaj li parolis per voĉo kvieta tamen penanta.

— Adiaŭ, sinjoro Holbitlo! Mia korpo estas rompita. Mi iras al miaj prapatroj. Kaj eĉ en ties potenca kompanio mi jam ne hontos. Mi pereigis la nigran serpenton. Minaca mateno, kaj ĝoja tago, kaj ora sunsubiro!

Gaja ne povis paroli, sed ploris denove.

— Pardonu min, moŝto, — li diris finfine, — se mi malobeis vian ordonon, kaj tamen ne pli faris por servi vin, ol plori pro nia disiĝo.

La maljuna reĝo ridetis.

— Ne malĝoju! Estas pardonite. Granda koro ne estas rifuzebla. Vivu jam benate; kaj kiam vi sidos pace kun via pipo, pensu pri mi! Ĉar jam neniam mi sidos kun vi en Meduseldo, kiel mi promesis, nek aŭskultos vian herboscion. — Li fermis la okulojn, kaj Gaja kliniĝis apude. Baldaŭ li

parolis denove. — Kie estas Eomero? Miaj okuloj malheliĝas, kaj mi volas vidi lin antaŭ ol mi foriros. Li devos esti reĝo post mi. Kaj mi volas sendi mesaĝon al Eovina. Ŝi, ŝi ne volis, ke mi forlasu ŝin, kaj jam mi ne revidos ŝin, pli karan ol filino.

— Mastro, mastro, — ekparolis Gaja plorsingulte, — ŝi estas... — sed tiumomente aŭdiĝis bruego, kaj ĉie ĉirkaŭe bloviĝis kornoj kaj trumpetoj. Gaja ĉirkaŭrigardis: li forgesis pri la milito kaj pri la tuta cetera mondo, kaj ŝajnis pasi multaj horoj post kiam la reĝo rajdis al sia falo, kvankam efektive tio estis nur mallonga tempo. Sed nun li vidis, ke minacas ilin ebleco implikiĝi en la mezo mem de la granda batalo, kiu baldaŭ okazos.

Novaj malamikaj trupoj alrapidadis laŭ la vojo de la Rivero; kaj de sub la muroj venis legioj de Morgulo; kaj de la sudaj kampoj venis infanterio de Harado kun rajdistoj antaŭe, kaj malantaŭ tiuj leviĝis grandaj dorsoj de *mumakoj*, sur kiuj estis militaj turoj. Sed norde la blanka kresto de Eomero estris la grandan fronton de la rohananoj, kiujn li denove kunigis kaj ordigis; kaj el la Urbo venis tuta armeo, kaj la arĝenta cigno de Dol Amroto estis portata avangarde, pelante la malamikojn for de la Pordego.

Momente trafulmis la menson de Gaja ekpenso: “Kie estas Gandalfo? Ĉu li ne ĉeestas? Ĉu li ne povintus savi la reĝon kaj Eovinan?” Sed ĝuste tiam alrajdis Eomero hastante, kaj kun li venis la domaj kavaliroj ankoraŭ vivantaj kaj jam mastrintaj siajn ĉevalojn. Ili mire rigardis la kadavron de la bestego tie kuŝanta; kaj iliaj rajdbestoj rifuzis proksimiĝi. Sed Eomero salte elseliĝis, kaj doloro kaj konsterniĝo trafis lin, kiam li alvenis la reĝon kaj staris tie silente.

Tiam unu el la kavaliroj prenis la reĝan standardon el la mano de Gutlafo la standardisto, kiu kuŝis mortinta, kaj li levis ĝin. Malrapide Teodeno malfermis siajn okulojn. Vidante la standardon, li signis, ke oni transdonu ĝin al Eomero.

— Saluton, Reĝo de Markio! — li diris. — Rajdu nun al venko! Adiaŭu Eovinan! — Kaj tiel li mortis, kaj ne sciis, ke Eovina kuŝas proksime. Kaj la apudstarantoj ploris kriante:

— Reĝo Teodeno! Reĝo Teodeno!

Sed Eomero diris al ili:

Ne tro lamentadu! La reĝo potencis,
la mort’ meritplenis. Kiam staros menhiro,
ploros virinoj. Vokas milito nun!

Tamen dumparole li mem larmis.

— Liaj kavaliroj restu ĉi tie, — li diris, — kaj portu honore lian korpon de sur la kampo, por ke ne transrajdu ĝin la batalo! Jes, kaj ĉiujn aliajn el la

reĝa korpuso, kiuj kuŝas ĉi tie. — Kaj li rigardis la mortigitojn, revokante ties nomojn. Tiam subite li ekvidis sian fratinon Eovina tie, kie ŝi kuŝis, kaj li rekonis ŝin. Li staris momente kvazaŭ homo trapikita dumkrie de trakora sago, kaj poste lia vizaĝo mortpaliĝis, kaj leviĝis en la malvarma furiozo, tiel ke parolpovon li provizore perdis. Trafis lin humoro sorĉita.

— Eovina, Eovina! — li ekkriis finfine. — Eovina, kiel okazis, ke vi estas ĉi tie? Kia frenezo aŭ fimagio estas tio ĉi? Morto, morto, morto prenu nin ĉiujn.

Tiam ne konsiliĝinte, nek atendinte proksimiĝon de la urbaj viroj, li spronis rekte reen ĝis la fronto de la homamasego, kaj blovis kornon, kaj krie ordonis la atakon. Tra la kampo sonoris lia klara voĉo:

— Morto! Rajdu, rajdu al ruino kaj la fino de l' mondo!

Kaj post tio la armeo komencis moviĝi. Sed la rohananoj ne plu kantis. "Morto", — ili kriis per unusona voĉo laŭta kaj terura, kaj plirapidante kvazaŭ granda tajdo ilia batalo ĉirkaŭimpetis la falintan reĝon kaj pasis formuĝante suden.

Kaj daŭre la hobito Gajadoko staris tie palpebrumante tra larmoj, kaj neniu alparolis lin, efektive neniu ŝajnis atenti lin. Li forviŝis la larmojn, kaj kliniĝis por levi la verdan ŝildon donitan al li de Eovina, kaj tiun li pendigis dorse. Poste li serĉis sian glavon, kiun li lasis fali; ĉar ĝuste kiam li batis, lia brako sensentiĝis, kaj nun li povis uzi nur la maldekstran. Kaj jen! tie kuŝis lia armilo, sed la klingo fumis kiel seka branĉo enŝovita en fajron; kaj dum li rigardis ĝin, ĝi tordiĝis, velkis kaj konsumiĝis.

Tiel pasis la glavo de Dolmenejo, laboraĵo el la okcidento. Sed ĝoje konus ĝian sorton tiu, kiu prilaboris ĝin malrapide antaŭlonge en la Norda Reĝlando, kiam la dunadanoj estis junaj, kaj ĉefa inter ties malamikoj estis la timiga regno Angmaro kaj ĝia sorĉista reĝo. Neniu alia klingo, eĉ se ĝin utiligus manoj pli potencaj, povus tiel draste vundi tiun malamikon, fendante la mortvivan karnon, rompante la sorĉon, kiu ligis ĝiajn nevideblajn tendenojn al ĝia volo.

Oni levis la reĝon, kaj surmetinte mantelojn sur lanclangojn sukcesis forporti lin al la Urbo; kaj aliaj levis milde Eovinan kaj portante sekvis lin. Sed la virojn el la reĝa domanaro ili ankoraŭ ne povis elkampigi; ĉar sep reĝaj kavaliroj falis tie, kaj inter ili estis Deorvino, ilia ĉefo. Do oni kuŝigis ilin aparte de iliaj malamikoj kaj la terura bestego kaj ĉirkaŭ ilin starigis lancojn. Kaj poste kiam ĉio estis farita, viroj revenis kaj bruligis fajron tie, kaj bruligis la kadavron de la bestego; sed por Neĝkolaĵo ili fosis tombon kaj starigis ŝtonon, sur kiu estis ĉizita en la lingvoj de Gondoro kaj Markio:

Servist' fidela, sed al mastro perfida,
id' de Leĝerpiedo, Neĝkolaĵo rapida.

Verda kaj longa kreskis la herbo sur Neĝkolaĵa Monteto, sed ĉiam nigra kaj senherba estis la tero, kie brulis la bestego.

Jam malrapide kaj triste Gaja marŝis apud la portantoj, kaj li ne plu atentis la batalon. Li estis lacega kaj dolorplena, kaj liaj membroj tremis kvazaŭ pro malvarmumo. El la Maro venis pluvego, kaj ŝajnis ke ĉio ploras pro Teodeno kaj Eovina, sufokante per grizaj larmoj la fajrojn en la Urbo. Tra nebuleto li baldaŭ vidis proksimiĝanta la avangardon de la viroj el Gondoro. Imrahilo, princo de Dol Amroto, alrajdis kaj haltis antaŭ ili.

— Kian ŝarĝon vi portas, viroj el Rohano? — li kriis.

— Reĝon Teodeno, — ili respondis. — Li estas mortinta. Sed reĝo Eomero jam rajdas en la batalo: tiu kun la blanka kresto sur la vento.

Tiam la princo forlasis sian ĉevalon, kaj genuis apud la kadavroportilo honore al la reĝo kaj ties granda alsturmo, kaj li ploris. Kaj stariĝinte li rigardis al Eovina kaj miris.

— Jen virino, ĉu ne? — li diris. — Ĉu eĉ la virinoj de la rohananoj venis militi pro nia bezono?

— Ne! Nur unu, — oni respondis. — Ŝi estas Damo Eovina, fratino de Eomero; kaj ni sciis nenion pri ŝia rajdado ĝis la nuna horo, kaj multe ni bedaŭras tion.

Tiam la princo vidante ŝian belon, kvankam ŝia vizaĝo estis pala kaj malvarma, tuŝis ŝian manon, dum li kliniĝis por rigardi ŝin de pli proksime.

— Viroj de Rohano! — li ekkriis. — Ĉu inter vi estas kuracistoj? Ŝi estas vundita, eble mortige, sed mi opinias, ke ŝi daŭre vivas. — Kaj li tenis antaŭ ŝiaj malvarmaj lipoj la poluritan brakŝirmilon sur sia brako, kaj jen! iom da nebuleto tegis ĝin apenaŭ videble.

— Rapido necesas, — li diris kaj sendis iun rerajdanton rapide al la Urbo por helpo. Sed profunde riverencinte al la mortigitoj, li adiaŭis ilin kaj surseliĝinte forrajdis en la batalon.

Kaj la batalado jam furioziĝis sur la kampoj de Pelenoro; kaj leviĝis alte la bruego de armiloj kun kriado de la homoj kaj henado de la ĉevaloj. Kornoj estis blovataj kaj blekis trumpetoj, kaj la *mumakoj* muĝis pelate en militon. Sub la sudaj muroj de la Urbo la piedsoldatoj el Gondoro nun peliĝis kontraŭ la legiojn de Mordoro, kiuj plu multnombris tie. Sed la rajdistoj iris orienten por helpi Eomeron: Hurino la Alta, Gardisto de l' ŝlosiloj, kaj la Estro de Losarnaĥo, kaj Hirluino el la Verdaj Montoj, kaj princo Imrahilo la Bela ĉirkaŭita de siaj kavaliroj.

Ne tro frue venis ilia helpo al la rohananoj; ĉar fortuno sin turnis kontraŭ Eomero, kaj lia furiozo perfidis lin. La koleregо de lia alsturmo tute venkis la fronton de liaj malamikoj, kaj kojnegoj de liaj rajdistoj tute trapasis la vicojn de la suduloj, konsternante ties rajdistojn kaj trete ruinigante ties

piedsoldatojn. Sed kie ajn venis la *mumakoj*, tien rifuzis iri la ĉevaloj, kiuj timegis kaj forturnis sin; kaj la grandaj monstroj estis ne atakitaj, kaj staris kvazaŭ defendaj turoj, kaj la haradanoj reformiĝis ĉirkaŭ ili. Kaj se la rohananoj jam de la komenco estis trioble superitaj de la nuraj haradanoj, baldaŭ ilia situacio iĝis malpli favora, ĉar novaj trupoj nun alverŝiĝis el Osgiliado sur la kampon. Tie ili estis starigitaj por trarabo de la Urbo kaj la perforto de Gondoro, atendante la alvokon de sia komandanto. Tiu jam estis detruita, sed Gotmogo, la estro de Morgulo, sendis ilin en la lukton; orientulojn kun hakiloj, variagojn el Kĥando, sudulojn skarlatvestitajn, kaj el fora Harado nigrajn virojn kvazaŭ duontrolojn kun blankaj okuloj kaj ruĝaj langoj. Iuj jam alrapidis malantaŭ la rohananoj, aliaj iris okcidenten por forteni la soldatojn de Gondoro kaj malhelpi, ke ili aliĝu al Rohano.

Ĝuste kiam la tago ekmalfavoris Gondoron, kaj ties espero ŝanceliĝis, aŭdiĝis nova kriego en la Urbo, kiam estis jam meze de l' mateno, kaj granda vento blovis, kaj la pluvo flugis norden, kaj la suno brilis. En tiu klara aero gardistoj sur la muroj vidis malproksime novan timindaĵon, kaj forlasis ilin ilia lasta espero.

Ĉar Anduino, de la kurbo ĉe Harlondo, tiel fluis, ke el la Urbo la homoj povis laŭrigardi ĝin longe tra pluraj leŭgoj, kaj akraviduloj povis vidi proksimiĝantajn ŝipojn. Kaj rigardante tien ili ekkriis konsternite, ĉar antaŭ la ekbrila riverfluo ili vidis nigran ŝiparon ventpelatan: fregatojn kaj ŝipojn ampleksajn kun multaj remiloj, kaj kun nigraj veloj ventoplenaj.

— La korsaroj de Umbaro! — homoj kriis. — La korsaroj de Umbaro! Vidu! La korsaroj de Umbaro venas! Do Belfalaso estas kaptita, kaj la Etiro, kaj perdiĝis Lebenino. La korsaroj atakas nin! Jen la lasta bato de la sorto!

Kaj iuj senordone, ĉar neniu troveblis por komandi ilin en la Urbo, kuris al la sonoriloj kaj sonorigis alarmon; kaj iuj blovis trumpete la signalon de la retroiro.

— Reen al la muroj! — ili kriis. — Reen al la muroj! Revenu al la Urbo antaŭ ol ĉiuj estos superverŝitaj! — Sed tiu vento, kiu rapidigis la ŝipojn, forblovis ilian tutan bruegon.

La rohananoj efektive ne bezonis informojn aŭ alarmon. Tre klare ili povis mem vidi la nigrajn velojn. Ĉar Eomero jam troviĝis apenaŭ pli ol unu mejlon for de Harlondo, kaj granda amaso de liaj unuaj malamikoj estis inter li kaj la haveno, dum novaj malamikoj venis kirliĝe de malantaŭe, fortranĉante lin disde la princo. Nun li alrigardis la Riveron, kaj espero mortis en lia koro, kaj tiun venton, kiun li antaŭe benis, li nun nomis malbenita. Sed la armeo de Mordoro estis kuraĝigita, kaj pleniĝis de freŝaj avido kaj furiozo dum ili kriegante alsturmis.

Rigora estis nun la humoro de Eomero, kaj lia menso denove klaris. Li

blovigis la kornojn por voki al siaj standardoj ĉiujn, kiuj povis tien alveni; ĉar li pensis starigi grandan ŝildmuron en la fino, kaj stari tie batalante ĝis ĉiuj pereus, kaj fari kantindaĵon sur la karnpo de Pelenoro, eĉ se neniu homo restus en la okcidento por memori la lastan Reĝon de Markio. Do li rajdis ĝis verda teramaseto kaj tie starigis sian standardon, kaj la Blanka Ĉevalo kuris flirte en la vento.

El dubo, el malhelo al la tagleviĝo
mi venis subsune kantante, glavon eltire.
Esperofinen mi rajdis kaj korrompiĝen:
jam koler', ruiniĝo kaj ruĝa noktiĝo!

Tiujn versojn li elparolis, tamen li ridis dirante ilin. Ĉar denove inundis lin batalavido; kaj li plu estis nevundita, kaj li estis juna, kaj li estis reĝo: mastro de potenca popolo. Kaj jen! ĝuste dum li priridis malesperon, li rigardis denove la nigrajn ŝipojn, kaj li levis sian glavon por defii ilin.

Kaj tiam lin trafis miro kaj granda ĝojego; kaj li ĵetis supren sian glavon en la sunlumo kaj kantis rekaptinte ĝin. Kaj ĉies okuloj sekvis lian rigardon, kaj vidu! sur la plej antaŭa ŝipo malfaldiĝis granda standardo, kaj la vento vidigis ĝin, kiam ĝi turnis sin al Harlondo. Tie floris la Blanka Arbo, kaj tiu reprezentis Gondoron; sed Sep Steloj ĉirkaŭis ĝin, kaj super ĝi estis alta krono, la signoj de Elendilo, kiujn posedis neniu regnestro dum jaroj nenombreblaj. Kaj la steloj flamis en la sunbrilo, ĉar ili estis kreitaj el gemoj de Arvena, filino de Elrondo, kaj la krono brilis en la mateno, ĉar ĝi estis farita el mitrilo kaj oro.

Tiel venis Aragorno, filo de Aratorno, Elesaro, heredinto de Isilduro, el la Padoj de la Mortintoj, portate de vento de la Maro al la reĝlando Gondoro; kaj la ĝojo de la rohananoj estis torento de ridado kaj flagrado da glavoj, kaj la ĝojo kaj mirego de la Urbo estis muziko de trumpetoj kaj sonorado de sonoriloj. Sed la armeojn de Mordoro trafis konfuziĝo, kaj tio ŝajnis al ili granda sorĉistaĵo, ke iliaj propraj ŝipoj estis plenaj de la malamikoj; kaj nigra timego inundis ilin, ĉar ili konstatis, ke la tajdoj de la sorto turniĝis kontraŭ ilin kaj ilia pereo estis proksima.

Orienten rajdis la kavaliroj de Dol Amroto, pelante antaŭ si la malamikojn: trolhomojn, variagojn kaj orkojn, kiuj malamis la sunlumon. Suden paŝegis Eomero kaj ili fuĝis antaŭ lia vizaĝo, kaj ili estis kaptitaj inter martelo kaj amboso. Ĉar jam viroj saltis el la ŝipoj sur la kajojn de Harlondo kaj kuregis norden kvazaŭ ŝtormo. Tien venis Legolaso, kaj Gimlio svinganta sian hakilon, kaj Halberado kun la standardo, kaj Eladano kaj Elrohiro kun steloj sur la fruntoj, kaj la durmanaj dunadanoj, la disiruloj de la nordo, kondukante grandan bravularon el Lebenino kaj Lamedono kaj

la sudaj provincoj. Sed antaŭ ĉiuj iris Aragorno kun la Flamo de l' Okcidento, Andurilo kiel nove ĉendita fajro, Narsilo reforĝita same terurige, kiel en pratempo; kaj sur lia frunto estis la stelo de Elendilo.

Kaj tiel finfine Eomero kaj Aragorno renkontiĝis meze de la batalo, kaj ili apogis sin per siaj glavoj kaj rigardis unu la alian kaj estis ĝojaj.

— Tiel ni renkontiĝas denove, malgraŭ tio, ke ĉiuj armeoj de Mordoro staris inter ni, — diris Aragorno. — Ĉu mi ne diris tion ĉe Kornburgo?

— Tion vi diris, — respondis Eomero, — sed espero ofte trompas, kaj tiam mi ne sciis, ke vi estas homo antaŭvidiva. Tamen duoble benita estas helpo neatendita, kaj neniam estis pli ĝoja renkontiĝo de amikoj. — Kaj ili manpremis. — Ankaŭ ne pli ĝustatempa, — diris Eomero. — Neniel tro frue vi venas, amiko mia. Multe da perdo kaj malĝojo trafis nin.

— Do ni venĝu tion antaŭ ol paroli pri ĝi! — diris Aragorno, kaj kune ili rerajdis al la batalo.

Malfacilan lukton kaj longan laboron ili ankoraŭ havis, ĉar la sudanoj estis kuraĝaj kaj severaj, kaj en malespero batalemaj, kaj la orientanoj estis fortaj kaj militharditaj kaj petis neniom da indulgo. Kaj tial en tiu loko kaj alia, apud bruligitaj farmdomoj aŭ grentenejoj, sur montetoj aŭ teramasoj, sub muroj kaj sur kampoj, ankoraŭ ili kuniĝis kaj reformiĝis kaj batalis ĝis la forvelko de la tago.

Tiam la suno finfine iris malantaŭ Mindoluinon kaj plenigis la ĉielon per granda brulado, tiel ke la montetoj kaj montoj tinkturiĝis kvazaŭ sange; fajro ardis en la Rivero, kaj la herbo de Pelenoro kuŝis ruĝa en la noktiĝo. Kaj en tiu horo finiĝis la granda batalo sur la kampo de Gondoro; kaj eĉ unu vivanta malamiko ne restis interne de la perimetro de Ramaso Ekor. Ĉiuj estis mortigitaj krom tiuj, kiuj fuĝis por morti aŭ droni en la ruĝa ŝaŭmo de la Rivero. Malmultaj revenis orienten al Morgulo aŭ Mordoro; kaj al la lando de la haradanoj venis nur rakonto el la malproksimo: onidiro pri la koleregо kaj teruro de Gondoro.

Aragorno, Eomero kaj Imrahilo rajdis reen al la Pordego de la Urbo, kaj ili jam lacis ekster ĝojo aŭ malĝojo. Tiuj tri estis nevunditaj, ĉar tia estis ilia sorto kaj la lerto kaj potenco de iliaj armiloj, kaj vere malmultaj aŭdacis konfronti ilin aŭ rigardi iliajn vizaĝojn dum la horo de ilia kolero. Sed multaj aliaj estis vunditaj aŭ lamigitaj aŭ mortigitaj sur la kampo. Hakiloj tranĉis Forlongon, dum li batalis sola kaj senĉevala; kaj Duilino el Morthondo kaj lia frato ambaŭ estis trample mortigitaj kiam ili atakis la *mumakojn*, kondukinte siajn pafarkistojn pli proksimen por celi la okulojn de la monstroj. Nek Hirluino la Bela revenos al Pinato Gelin, nek Grimboldo al Grimslado, nek Halberado, durmana disirulo, al la Norda Lando. Ne malmultaj pereis, famaj aŭ senrenomaj, kapitanoj aŭ soldatoj; ĉar

tio estis granda batalo kaj la plenan sumon de ĝi neniu historio rakontis.

Do longe poste poeto en Rohano diris en sia kanto pri la dolmenoj de Mundburgo.

Ni aŭdis pri l' kornoj en montoj sonoraj,
pri l' glavoj brilantaj en Suda reĝlando.
Paŝis ĉevaloj al Stoninglando
kiel vento matena. Ĉendiĝis milito.
Pereis Teodeno, potenca princido,
al oraj haloj kaj verdaj paŝtejoj
en nordaj kampoj neniam revene,
l' armea ĉefestro. Hardingo, Gutlafo,
Dunhero, Deorvino, la brava Grimboldo,
Herefaro, Herubrando, Horno, Fastredo,
batalis kaj falis en fora tereno:
en Montoj Mundburgaj sub hum' ili kuŝas
kun aliancanoj, princoj Gondoraj.
Nek bela Hirluino al mara montaro,
nek olda Forlongo al valoj florantaj
al Arnaĥo iam, lia propra hejmloko
reiris triumfe; nek altaj pafistoj
Derufin', Duilino, al akvo malhela,
marŝoj Morthondaj sub monta ombraro.
Morto matene kaj fine de l' tago
lordojn kaj ordinarulojn prenis, longe
jam dormas ili sub herbo Gondora
apud la Granda River' nun griza larmece
kaj brile arĝenta, tiam ĝi ruĝis
ruliĝe, akvo brue blekanta:
ŝaŭmo sanga flamis je sunsubiro;
vespere brulis montoj signalofajre;
ruĝis la roso en Ramaso Ekor.

7

La ŝtiparo de Denetoro

Kiam la malhela ombro ĉe la Pordego foriris, Gandalfo plu sidis senmove. Sed Grinĉjo stariĝis, kvazaŭ granda pezo estus forlevita de li; kaj li staris aŭskultante la kornojn, kaj ŝajnis al li, ke ili rompos al li la koron pro ĝojo. Kaj neniam dum postaj jaroj li povis aŭdi kornon en la malproksimo sen tio, ke larmoj aperis en liaj okuloj. Sed nun lia komisio subite revenis al lia memoro, kaj li kuris antaŭen. Tiumomente Gandalfo ekmoviĝis kaj parolis al Ombrofakso, kaj estis rajdonta tra la Pordego.

— Gandalfo, Gandalfo! — kriis Grinĉjo, kaj Ombrofakso haltis.

— Kial vi estas ĉi tie? — diris Gandalfo. — Ĉu ne estas leĝo en la Urbo, ke portantoj de la nigro kaj arĝento devas resti en la Citadelo, krom se la Mastro permesas, ke ili foriru?

— Tion li faris, — diris Grinĉjo. — Li forsendis min. Sed mi timas. Io terura eble okazos tie supre. La Mastro malsaĝiĝis, laŭ mia opinio. Mi timas, ke li sin mortigos, kaj mortigos ankaŭ Faramiron. Ĉu vi ne povas ion fari?

Gandalfo trarigardis la gapan Pordegon, kaj jam sur la kampoj li aŭdis la kreskantan bruon de batalado. Li pugnigis sian manon.

— Mi devas iri, — li diris. — La Nigra Rajdanto vagas, kaj li ankoraŭ alportos al ni ruinon. Mankas al mi tempo.

— Tamen Faramiro! — kriis Grinĉjo. — Li ne estas mortinta, kaj oni bruligos lin vivantan, se iu ne malhelpos ilin.

— Ĉu bruligos vivantan? — diris Gandalfo. — Pri kio temas? Rapidu!

— Denetoro iris al la Tomboj, — diris Grinĉjo, — kaj li kunprenis Faramiron, kaj li diris, ke ni ĉiuj estas bruligotaj, kaj li ne atendos, kaj oni devos konstrui ŝtiparon kaj bruligi sur ĝi lin kaj Faramiron. Kaj li sendis homojn por alporti lignon kaj oleon. Kaj mi sciigis Beregondon, sed mi timas, ke li ne riskos forlasi sian postenon: li sentinelas. Kaj ĉiuokaze, kion li povas fari? — Tiel Grinĉjo elverŝis sian rakonton, streĉante sin supren kaj tuŝante la genuon de Gandalfo per la tremaj manoj. — Ĉu vi povas savi Faramiron?

— Eble mi povas, — diris Gandalfo; — sed se jes, tiam mortos aliaj, mi timas. Nu mi devas veni, ĉar neniu alia helpo povas atingi lin. Sed el tio ĉi venos miso kaj malĝojo. Eĉ en la mezo de nia fortikaĵo la Malamiko kapablas trafi nin: ĉar ĝuste lia volo enmiksiĝas.

Tiam decidiĝinte li agis rapide; kaj levinte Grinĉjon kaj lin sidiginte antaŭ sin, per vorto li turnis Ombrofakson. Supren laŭ la ascendaj vojoj de Minaso Tirit ili klakadis, dum la milita bruo kreskis malantaŭ ili. Ĉie viroj stariĝis el siaj malespero kaj timego, kaptante siajn armilojn, kriante unu al alia: “Rohano venis!” Komandantoj kriis, kompanioj apeliĝis; multaj jam marŝis suben al la Pordego.

Ili renkontis princon Imrahilo, kaj tiu vokis al ili:

— Kien nun, Mitrandiro? La rohananoj batalas sur la kampoj de Gondoro! Ni devas kunigi ĉiujn troveblajn fortojn.

— Vi bezonos ĉiujn virojn kaj pli, — diris Gandalfo. — Laŭeble rapidu. Mi venos, kiam mi povos. Sed mi havas komision pri Mastro Denetoro, kiu estas neprokrastebla. Komandu dum la foresto de la Mastro!

Ili pluiris; kaj dum ili plialtiĝis kaj proksimiĝis al la Citadelo, ili sentis la venton sur siaj vizaĝoj, kaj ili ekvidis brileton de la mateno en foro, lumon kreskantan sur la suda ĉielo. Sed tiu alportis al ili malmulte da espero, sensciaj pri la misaĵo, kiu kuŝis antaŭ ili, timantaj veni tro malfrue.

— La mallumo forpasas, — diris Gandalfo, — sed ĝi ankoraŭ kuŝas peze sur tiu ĉi Urbo.

Ĉe la pordo de la Citadelo ili trovis neniun sentinelon.

— Do Beregondo iris, — diris Grinĉjo pli espere. Ili forturnis sin kaj rapidis laŭ la vojo al la Fermita Pordo. Ĝi staris larĝe aperta, kaj la gardisto kuŝis antaŭ ĝi. Li estis mortigita, kaj lia ŝlosilo estis forprenita.

— Fare de la Malamiko! — diris Gandalfo. — Tiajn farojn li ŝatas: amiko militu kontraŭ amiko; lojalo dividita pro konfuziĝo de koroj. — Li elseliĝis kaj ordonis, ke Ombrofakso reiru al sia stalo. — ĉar, amiko mia, vi kaj mi devis antaŭlonge reiri al la kampoj, sed aliaj aferoj prokrastigas min. Tamen venu rapide, kiam mi vokos!

Ili pasis la pordon kaj marŝis suben laŭ la serpentuma vojo. Lumo kreskis, kaj la altaj kolonoj kaj ĉizitaj figuroj apudvoje preteriris malrapide kvazaŭ grizaj fantomoj.

Subite la silento estis rompita, kaj ili aŭdis sube kriojn kaj sonoradon de glavoj: tiajn sonojn, kiaj ne estis aŭditaj en la sanktaj lokoj depost la konstruado de la Urbo. Finfine ili alvenis al Rat Dineno kaj rapidis al la Domo de la Regantoj, kiu baŭmis sub sia granda kupolo en la krepusko.

— Ĉesu! Ĉesu! — kriis Gandalfo, saltante antaŭen al la ŝtona ŝtuparo antaŭ la pordo. — Ĉesigu ĉi frenezaĵon!

Ĉar tie estis la servistoj de Denetoro kun glavoj kaj torĉoj en la manoj; sed sola sub la portiko sur la plej alta ŝtupo staris Beregondo, vestita per la nigro kaj arĝento de la gardistaro; kaj li forbaris al ili la pordon. Du el ili jam falis pro lia glavo, makulante la sanktejon per sia sango; kaj aliaj

malbenis lin, nomante lin eksterleĝulo kaj perfidinto de la Mastro.

Ĝuste kiam Gandalfo kaj Grinĉjo kuris antaŭen, ili aŭdis en la domo de la mortintoj la voĉon de Denetoro krianta:

— Rapidu, rapidu! Faru laŭ mia ordono! Mortigu por mi tiun renegaton! Aŭ ĉu mi mem devos tion fari?

Tiam la pordo, kiun Beregondo maldekstramane tenis fermita, estis abrupte malfermita, kaj tie malantaŭ li staris la Mastro de la Urbo, alta kaj minaca; lumo flamsimila estis en liaj okuloj, kaj li tenis elingigitan glavon.

Sed Gandalfo saltis supren laŭ la ŝtupoj, kaj la homoj retroiris antaŭ li kaj kovris siajn okulojn; ĉar lia alveno similis envenon de blanka lumo en lokon malhelan, kaj li venis ege kolera. Li levis sian manon, kaj dum bato mem la glavo de Denetoro flugis alten kaj eliris el lia man-teno kaj falis malantaŭ li en la ombroj de la domo; kaj Denetoro retropaŝis antaŭ Gandalfo mirigite.

— Kio estas tio ĉi, Mastro? — diris la sorĉisto. — La domoj de la mortintoj ne taŭgas al vivantoj. Kaj kial viroj batalas ĉi tie en la sanktejo, kiam sufiĉe da milito okazas antaŭ la Pordego? Aŭ ĉu nia Malamiko venis eĉ al Rat Dineno?

— Ekde kiam la Mastro de Gondoro devas pravigi sin al vi? — demandis Denetoro. — Aŭ ĉu mi ne rajtas ordoni al miaj servistoj?

— Vi rajtas, — diris Gandalfo. — Sed aliaj rajtas kontraŭstari vian volon, kiam ĝi turniĝas al frenezo kaj miso. Kie estas via filo Faramiro?

— Li kuŝas interne, — diris Denetoro, — brulanta, jam brulanta. Ili bruligis fajron en lia karno. Sed baldaŭ forbrulos ĉiuj. La Okcidento malsukcesis. Ĝi detruiĝos en granda incendio, kaj ĉio finiĝos. Cindro! Cindro kaj fumo forblovotaj per la vento!

Gandalfo, vidante la frenezon, kiu okupis lin, timis, ke li jam plenumis ian misaĵon, kaj li impetis antaŭen kun Beregondo kaj Grinĉjo malantaŭe, dum Denetoro retroiris ĝis li haltis apud la tablo interne. Sed tie ili trovis Faramiron, plu sonĝantan en sia febro, kuŝanta sur la tablo. Ligno estis staplita sub la tablo kaj alte ĉirkaŭ ĝi, kaj ĉio estis saturita je oleo, eĉ la vestaĵoj de Faramiro kaj la tukoj; sed ankoraŭ ne estis ĉendita la brulaĵo. Tiam Gandalfo vidigis la forton, kiu en li estis kaŝita, samkiel la lumo de lia potenco estis kaŝita sub lia griza mantelo. Li suprensaltis sur la ŝtipojn, kaj levinte la malsanulon senstreĉe li resaltis suben, kaj portis lin al la pordo. Sed dum li faris tion, Faramiro ĝemis kaj alvokis sian patron dumsonĝe.

Denetoro tikegis kvazaŭ vekiĝanta el tranco, kaj la flamo formortis en liaj okuloj, kaj li ekploris; kaj li diris:

— Ne forprenu de mi mian filon! Li alvokas min.

— Li vokas, — diris Gandalfo, — sed vi ankoraŭ ne rajtas veni al li. Ĉar

li devas serĉi kuracon sur la sojlo de la morto, kaj eble ne trovi ĝin. Intertempe via rolo estas eliri al la batalo en via Urbo, kie eble atendas vin morto. Tion vi scias en via koro.

— Li ne revekiĝos, — diris Denetoro. — Batalado vanas. Kial ni deziru vivi pli longe? Kial ni ne iru morten flank-al-flanke?

— Aŭtoritato ne estas donita al vi, Reganto de Gondoro, decidi la horon de via morto, — respondis Gandalfo. — Kaj nur la reĝoj paganaj, sub la regno de la Malhela Potenco, faris tiel, mortigante sin en fiero kaj malespero, murdante sian parencaron por faciligi la propran morton.

Poste, trapasinte la pordon, li prenis Faramiron el la mortiga domo kaj kuŝigis lin sur la kadavroportilon, sur kiu li estis alportita, kaj kiu estis nun starigita sub la portiko. Denetoro sekvis lin, kaj staris tremante, rigardante sopire la vizaĝon de sia filo. Kaj momente, dum ĉiuj silentis kaj senmovis, rigardantaj la Mastron en ties agonio, li ŝanceliĝis.

— Venu! — diris Gandalfo. — Ni estas bezonataj. Multon vi ankoraŭ povos fari.

Tiam subite Denetoro ridis. Li staris denove alta kaj fiera, kaj repaŝinta rapide al la tablo li levis de sur ĝi la kusenon, al kiu lia kapo estis apogita. Poste, veninte al la enirejo li flanken ŝovis la kovrilon, kaj jen! li tenis inter la manoj *palantiron*. Kaj kiam li levis ĝin, ŝajnis al la spektantoj, ke la globo ekardas pro interna flamo, tiel ke la magran vizaĝon de la Mastro prilumis kvazaŭruĝa fajro, kaj ĝi ŝajnis ĉizita el ŝtono dura, akra pro nigraj ombroj, nobla, fiera, kaj terura. Liaj okuloj ekbriletis.

— Ĉu fiero kaj malespero! — li kriis. — Ĉu vi supozis, ke blindas la okuloj de la Blanka Turego? Ne, mi vidis pli ol vi scias, Griza Folulo. Ĉar via espero estas nur senscio. Iru do kaj laboru kurace! Eliru kaj batalu! Vanto. Dum iomete da tempo vi eble triumfos sur la kampo, dum unu tago. Sed la Potenco nun leviĝanta nevenkeblas. Al tiu ĉi Urbo nur la unua fingro de ties mano ĝis nun etendiĝis. La tuta oriento moviĝas. Kaj jam nun la vento de via espero trompas vin, kaj alblovas laŭ Anduino ŝiparon kun nigraj veloj. La Okcidento malsukcesis. Jam tempo estas, ke ĉiuj foriru, kiuj ne volas esti sklavoj.

— Tiaj konsiloj efektive certigos la Malamikan venkon, — diris Gandalfo.

— Do esperu plu! — ridis Denetoro. — Ĉu mi ne konas vin, Mitrandiro? Vi esperas regi anstataŭ mi, stari malantaŭ ĉiu trono, norde, sude kaj okcidente. Mi tralegis vian menson kaj ties politikon. Ĉu mi ne scias, ke vi ordonis al jena duonulo daŭre silenti? Ke vi alportis lin ĉi tien, por ke li estu spiono en mia ĉambro mem? Kaj tamen dum nia interparolo mi ekkonis la nomojn kaj celon de ĉiuj viaj kunuloj. Do! Per la maldekstra

mano vi volas uzi min dum kelka tempo kiel ŝirmilon kontraŭ Mordoro, kaj per la dekstra alvenigi tiun disirulon de la nordo por anstataŭi min. Sed mi diras al vi, Gandalfo Mitrandiro, ke mi ne estos via instrumento! Mi estas Reganto el la Domo de Anariono. Mi ne cedos por esti kaduka ĉambelano de iu parvenuo. Eĉ se lia pretendo estus pruvita al ni, lia deveno estas nur laŭ la linio de Isilduro. Mi ne kliniĝos al tia persono, la lasta el ĉifona domanaro jam longe senigita je nobeleco kaj digno.

— Kion do vi volus havi, — diris Gandalfo, — se via volo ricevus sian deziron?

— Mi volus, ke ĉio estu tia, kia ĝi estis dum ĉiuj tagoj de mia vivo, — respondis Denetoro, — kaj dum la tagoj de miaj prapatroj antaŭ mi: estri la Urbon en paco, kaj lasi post mi seĝon por mia filo, kiu estus la propra mastro kaj ne lernanto de sorĉisto. Sed se la sorto rifuzas tion al mi, tiam mi volas havi *nenion*: nek vivon reduktitan, nek duonigitan amon, nek honoron malfortigitan.

— Al mi ne ŝajnas, ke Reganto, kiu fidele transdonus sian regaĵon, estus reduktita rilate amon aŭ honoron, — diris Gandalfo. — Kaj minimume vi ne rabos al via filo lian elekton dum lia morto plu dubindas.

Je tiuj vortoj la okuloj de Denetoro reflamiĝis, kaj subakseliginte la ŝtonon li elingigis ponardon kaj paŝis al la kadavroportilo. Sed Beregondo saltis antaŭen kaj stariĝis antaŭ Faramiro.

— Do! — kriis Denetoro. — Vi jam forŝtelis duonon de la amo de mia filo. Nun vi ŝtelas ankaŭ la korojn de miaj kavaliroj, tiel ke ili tute rabas al mi mian filon en la fino. Sed almenaŭ pri tio ĉi vi ne kontraŭstaros niian volon: regi mian propran finon. Venu! — li kriis al siaj servistoj. — Venu, se vi ne estas ĉiuj perfidintoj!

Tiam du el ili kuris al li supren laŭ la ŝtuparo. Rapide li kaptis torĉon el la mano de unu el ili kaj resaltis en la domon. Antaŭ ol Gandalfo povis malhelpi tion, li ŝovis la ardaĵon inter la brulaĵojn, kaj tuj ili ekkrakis kaj muĝe flamiĝis.

Poste Denetoro saltis sur la tablon, kaj starante tie volvita per fajro kaj fumo, li levis la bastonon de sia reganteco, kiu kuŝis antaŭ liaj piedoj, kaj rompis ĝin per sia genuo. Ĵetinte la pecojn en la flamojn, li riverencis kaj sin kuŝigis sur la tablo, ambaŭmane premante al sia brusto la *palantiron*. Kaj oni diras, ke ĉiam poste, se iu rigardis en tiun ŝtonon, krom se li havus grandan volforton por alimaniere utiligi ĝin, li vidis nur du maljunajn manojn velkantaj en flamoj.

Gandalfo en malĝojo kaj hororo forturnis la vizaĝon kaj fermis la pordon. Kelkan tempon li staris penseme, silenta sur la sojlo, dum tiuj, kiuj estis ekstere, aŭdis la avidan muĝon de la fajro interne. Kaj poste Denetoro

eligis laŭtan krion, kaj poste ne plu parolis, nek estis iam ajn denove vidita de mortemuloj.

— Tiel forpasas Denetoro, filo de Ekteliono, — diris Gandalfo. Poste li sin turnis al Beregondo kaj la servistoj de la Mastro, kiuj staris tie konsternite. — Kaj tiel pasas ankaŭ tiuj tagoj de Gondoro, kiujn vi konis: ĉu bone, ĉu malbone, ili finiĝis. Misaĵoj estas faritaj ĉi tie; sed nun metu flanken ĉiun malamikecon, kiu estas inter vi, ĉar ĝin aranĝis la Malamiko, kaj ĝi efikas laŭ lia volo. Vi estis kaptitaj per araneaĵo de kontraŭantaj devoj, kiun ne vi teksis. Sed pensu, vi servistoj de la Mastro, blinde obeemaj, ke sen la perfido de Beregondo ankaŭ Faramiro, komandanto de la Blanka Turego, jam estus bruligita. Forportu el tiu ĉi malfeliĉa loko viajn kamaradojn, kiuj pereis. Kaj ni portos Faramiron, Mastron de Gondoro, al loko, kie li povos dormi pace, aŭ morti, se tia estos lia sorto.

Gandalfo kaj Beregondo, levinte la portilon, forportis ĝin al la Domoj de Kuracado, dum malantaŭ ili marŝis Grinĉjo kun la klinita kapo. Sed la servistoj de la Mastro staris rigardante kiel afliktitoj la domon de la mortintoj. Kaj ĝuste kiam Gandalfo atingis la finon de Rat Dineno aŭdiĝis bruego. Retrorigardante ili vidis la kupolon de la domo splitiĝi kaj fumojn eliĝi; kaj poste kun falego kaj muĝado de ŝtonoj ĝi falis en agitiĝo de fajro; sed plu nereduktite la flamoj dancis kaj flagris en la ruinaĵo. Tiam terurite la servistoj fuĝis kaj sekvis Gandalfon.

Fine ili revenis al la Pordo de l' Regantoj, kaj Beregondo rigardis malĝoje la pordiston.

— Tiun faron mi ĉiam bedaŭros, — li diris; — sed freneza hastemo pelis min, kaj li ne volis aŭskulti, sed elingigis glavon kontraŭ min. — Preninte la ŝlosilon, kiun li kaptis de la mortigito, li fermis la pordon kaj ŝlosis ĝin. — Tion ĉi oni nun devus transdoni al la Mastro Faramiro, — li diris.

— La princo de Dol Amroto komandas dum la foresto de la Mastro, — diris Gandalfo, — sed pro tio, ke li ne ĉeestas, mi devas mem respondeci pri tio ĉi. Mi ordonas, ke vi konservu la ŝlosilon kaj ĝin gardu, ĝis la Urbo denove estos ordigita.

Nun finfine ili pasis en la altajn rondojn de la Urbo, kaj en la matena lumo ili vojiris al la Domoj de Kuracado; kaj tiuj estis belaj domoj destinitaj prizorgi tiujn, kiuj grave malsanis, sed nun ili estis pretigitaj por flegado de vunditoj en batalo aŭ mortontoj. Ili staris ne malproksime de la Citadela Pordo, en la sesa rondo, apud ties suda muro, kaj ĉirkaŭ ili estis ĝardeno kaj razeno kun arboj, la sola tia loko en la Urbo. Tie loĝis la malmultaj virinoj, al kiuj estis permesite resti en Minaso Tirit, ĉar ili estis lertaj pri kuracado aŭ servantoj de la kuracistoj.

Sed ĝuste kiam Gandalfo kaj liaj kunuloj venis portante la portilon al la ĉefpordo de la Domoj, ili aŭdis kriegon, kiu leviĝis el la kampo antaŭ la Pordego kaj leviĝinte akre kaj trapike sur la ĉielon pasis, kaj formortis sur la vento. Tiel terura estis la krio, ke momente ĉiuj staris senmove, kaj tamen post ĝia forpaso subite iliaj koroj estis ekzaltitaj per tia espero, kian ili ne konis de kiam la mallumo venis el la oriento; kaj ŝajnis al ili, ke la lumo klariĝas kaj la suno trarompas la nubojn.

Sed la vizaĝo de Gandalfo estis serioza kaj malĝoja, kaj ordoninte, ke Beregondo kaj Grinĉjo prenu Faramiron en la Domojn de Kuracado, li suriris la apudajn murojn; kaj tiel kiel figuro ĉizita el blanko li staris sub la nova suno kaj forrigardis. Kaj li vidis per la vidkapablo, donita al li, ĉion, kio okazis; kaj kiam Eomero elrajdis el la avangardo de la batalo kaj staris apud tiuj, kiuj falis sur la kampo, li suspiris, kaj li denove ĵetis sur sin sian mantelon, kaj foriris de sur la muroj. Kaj Beregondo kaj Grinĉjo trovis lin staranta penseme antaŭ la pordo de la Domoj, kiam ili eliris.

Ili rigardis lin, kaj dum kelka tempo li silentis. Fine li ekparolis:

— Amikoj miaj kaj ĉiuj homoj de tiu ĉi urbo kaj de la okcidentaj landoj! Aferoj ege tristaj kaj gloraj estas okazintaj. Ĉu ni ploru aŭ ĝoju? Pli ol ni esperis, la Komandanto de niaj malamikoj estas detruita, kaj vi aŭdis la eĥon de lia lasta malespero. Sed li ne iris sen doloro kaj amaraj perdoj. Kaj tion mi eble evitus, se ne okazus la frenezeco de Denetoro. Tiel longe etendiĝas la atingo de nia Malamiko! Ve! Sed nun mi konstatas, kiel lia volo povis eniri la kernon mem de la Urbo.

» Kvankam la Regantoj supozis, ke tio estas sekreto konservata nur de ili, jam longe mi sciis, ke ĉi tie en la Blanka Turego, kiel ĉe Ortanko, unu el la Sep ŝtonoj estas gardata. Dum la tagoj de sia saĝo Denetoro ne arogis al si uzi ĝin, nek defii Saŭronon, konante la limojn de la propra forto. Sed lia saĝo velkis; kaj mi timas, ke dum kreskis la danĝero de lia regno li enrigardis la ŝtonon kaj estis trompita: pli ol unufoje, mi konjektas, post kiam Boromiro foriris. Li estis tro forta por submetiĝi al la volo de la Malhela Potenco, tamen li vidis nur tion, kion tiu Potenco permesis al li. La informoj, kiujn li akiris, sendube ofte utilis al li; tamen la vizio de la granda potenco de Mordoro, kiu estis montrita al li, nutris la malesperon en lia koro ĝis ĝi renversis lian menson.

— Jam mi komprenas tion, kio ŝajnis al mi stranga! — diris Grinĉjo, tremegante pro la rememoro dumparole. — La Mastro foriris el la ĉambro en kiu kuŝis Faramiro; kaj nur post lia reveno mi pensis la unuan fojon, ke li estas sanĝita, maljuna kaj kaduka.

— Estis ĝuste en la horo mem, en kiu Faramiro estis portita al la Turego, ke multaj el ni vidis strangan lumon en la plejalta ĉambro, — diris

Beregondo. — Sed ni vidis pli frue tiun lumon, kaj jam delonge en la Urbo vastiĝis onidiro, ke la Mastro de tempo al tempo luktis enpense kontraŭ sia Malamiko.

— Ve! do mi konjektis prave, — diris Gandalfo. — Tiel la volo de Saŭrono eniris en Minason Tirit; kaj tial mi estas prokrastigita ĉi tie. Kaj ĉi tie mi estos devigata resti, ĉar baldaŭ min ŝarĝos aliaj taskoj, ne nur Faramiro. Nun mi devas iri suben por renkonti la venontojn. Mi vidis sur la kampo ion, kio tre malĝojigas mian koron, kaj eble realiĝos eĉ pli granda malĝojo. Akompanu min, Grinĉjo! Sed vi, Beregondo, devas reiri al la Citadelo kaj rakonti tie al la ĉefgardisto ĉion, kio okazis. Estos lia devo, bedaŭrinde, eksigi vin el la gardistaro, sed diru al li, ke se mi rajtas konsili lin, vi devus esti sendita al la Domoj de Kuracado por esti la gardanto kaj servisto de via komandanto, kaj esti ĉe lia flanko, kiam li vekiĝos — se tio iam ajn okazos. Ĉar ĝuste vi savis lin el la fajro. Iru tuj! Mi revenos baldaŭ.

Tion dirinte li forturniĝis kaj iris kun Grinĉjo malsupren al la subaj partoj de la urbo. Kaj ĝuste kiam ili rapide laŭvojis la vento alportis grizan pluvon, kaj ĉiuj fajroj malardiĝis, kaj leviĝis antaŭ ili granda fumego.

8

La Domoj de Kuracado

En la okuloj de Gaja estis nebuleto kaj laco, kiam ili proksimiĝis al la ruinigita Pordego de Minaso Tirit. Li malmulte atentis la ruinaĵon kaj buĉadon, kiuj estis ĉirkaŭe. Fajro, fumo kaj fetoro estis en la aero; ĉar multaj maŝinoj estis bruligitaj aŭ ĵetitaj en la fajroputojn, kaj ankaŭ multaj mortigitoj, dum ie-tie kuŝis multaj kadavroj de la grandaj sudaj monstroj, duonbruligitaj, aŭ rompitaj per ŝtonĵeto, aŭ okule trapafitaj de la kuraĝaj pafarkistoj de Morthondo. La pluvo jam ĉesis antaŭ kelka tempo, kaj la suno ekbrilis supre; sed la tutan suban urbon daŭre volvis arda fumaĵo.

Jam laboris homoj por liberigi vojon tra la postlasaĵo de la batalo; kaj nun tra la pordo eliris palankenistoj. Milde ili kuŝigis Eovinan sur molajn kusenojn; sed la korpon de la reĝo ili kovris per tukego ora, kaj ĉirkaŭ li ili portis torĉojn, kaj ties flamojn, palajn en la sunlumo, flirtigis la vento.

Tiel venis Teodeno kaj Eovina al la ĉefurbo de Gondoro, kaj ĉiuj kiuj vidis ilin, malkovris la kapon kaj riverencis; kaj ili trapasis la cindrojn kaj fumon de la bruligita cirklo, kaj pluiris supren laŭ la ŝtonaj stratoj. Al Gaja la supreniro ŝajnis epoklonga, vojaĝo sensenca en malagrablega sonĝo, plu kaj plu iranta al iu neklara fino, kiun la memoro ne povas rekapti.

Malrapide la lumoj de la torĉoj antaŭ li flagris kaj estingiĝis, kaj li marŝis en mallumo; kaj li pensis: “Tio ĉi estas tunelo kondukanta al tombo; tie ni restos poreterne”. Sed subite en lian sonĝon falis voĉo vivanta.

— Nu, Gaja! Dank’ al sorto mi trovis vin!

Li suprenrigardis kaj la nebuleto sur liaj okuloj iom klariĝis. Estis Grinĉjo! Ili estis vizaĝ-al-vizaĝe en mallarĝa vojeto, kaj krom ili en ĝi estis neniu. Li frotis siajn okulojn.

— Kie estas la reĝo? — li diris. — Kaj Eovina? — Poste li stumblis kaj sidiĝis sur doman antaŭŝtupon kaj komencis plori denove.

— Ili iris supren en la Citadelon, — diris Grinĉjo. — Ŝajnas al mi, ke vi ekdormis marŝante kaj iris malĝustan vojon. Kiam ni konstatis, ke vi ne estas kun ili, Gandalfo sendis min por serĉi vin. Kompatinda Gajĉjo! Kiom mi ĝojas revidante vin! Sed vi estas elĉerpita, kaj mi ne ĝenos vin per parolado. Sed diru al mi, ĉu vi estas difektita, aŭ vundita?

— Ne, — diris Gaja. — Nu, ne, mi opinias, ke ne. Sed mi ne povas uzi mian dekstran brakon, Grinĉjo, de kiam mi trapikis lin. Kaj mia glavo brulis kvazaŭ ŝtipeto.

La vizaĝo de Grinĉjo zorgoplenis.

— Nu, prefere venu kun mi laŭeble rapide, — li diris. — Se nur mi povus porti vin. Vi ne sufiĉe fortas por marŝi plu. Oni ne devis permesi, ke vi entute marŝu; sed vi devas pardoni ilin. Okazis tiom da teruraj aferoj en la Urbo, Gaja, ke unu kompatinda hobito venanta post la batalo estas facile pretervidebla.

— Esti pretervidata ne ĉiam estas misfortune, — diris Gaja. — Min pretervidis ĵus... ne, ne, pri tio mi ne volas paroli. Helpu min, Grinĉjo! Ĉio denove mallumiĝas, kaj mia brako tiom malvarmas.

— Apogu vin al mi, knabo Gaja! — diris Grinĉjo. — Ek jam! Piedon post piedo. Ne estas malproksime.

— Ĉu vi intencas entombigi min? — demandis Gaja.

— Ja ne! — diris Grinĉjo, klopodante soni feliĉa, kvankam lian koron vringis timo kaj kompato. — Ne, ni iras al la Domoj de Kuracado.

Ili turnis sin el la vojeto, kiu pasis inter altaj domoj kaj la ekstera muro de la kvara cirklo, kaj ili retrovis la ĉefstraton kondukantan supren al la Citadelo. Paŝon post paŝo ili iris, dum Gaja ŝanceliĝis kaj murmuris kvazaŭ dormanto.

“Mi neniam venigos lin tien, — pensis Grinĉjo. — Ĉu troveblas neniu por helpi min? Mi ne povas lasi lin ĉi tie”. Ĝuste tiam je lia surprizo knabo kure alvenis malantaŭe, kaj tiun pasanton li rekonis kiel Bergilon, filon de Beregondo.

— Saluton, Bergilo, — li vokis. — Kien vi iras? Mi ĝojas revidi vin, kaj ankoraŭ vivantan!

— Mi kure plenumas komisiojn por la kuracistoj, — diris Bergilo. — Mi ne povas halti.

— Ne haltu! — diris Grinĉjo. — Sed diru al ili tie supre, ke ĉe ni estas malsana hobito, *periano*, notu, veninta post la batalo. Al mi ŝajnas, ke li ne povas marŝi tiomdistance. Se Mitrandiro estos tie, li ĝojos pri la mesaĝo. — Bergilo plu kuris.

“Prefere mi atendu ĉi tie”, — pensis Grinĉjo. Do li permesis, ke Gaja sinku malrapide al la pavimo en lageto da sunlumo, kaj poste li sidiĝis apud li, kuŝigante la kapon de Gaja sur sia sino. Li palpis milde lian korpon kaj liajn membrojn, kaj prenis la manojn de sia amiko inter la proprajn. La dekstra mano sentiĝis glacieca.

Post nelonge Gandalfo mem venis, serĉante ilin. Li kliniĝis super Gaja kaj karesis ties frunton; poste li zorge levis lin.

— Li devis esti portita honore en tiun ĉi urbon, — li diris. — Li plene pravigis mian fidon; ĉar se Elrondo ne cedus al mi, neniu el vi ambaŭ ekirus; kaj tiuokaze multe pli misaj estus la fiaĵoj de ĉi tiu tago. — Li

suspiris. — Kaj tamen jen por mi alia ŝarĝo, dum la tutan tempon la batalo balanciĝas.

Do finfine Faramiro, Eovina kaj Gajadoko estis enlitigitaj en la Domoj de Kuracado; kaj tie oni flegis ilin bone. Ĉar kvankam ĉiu klero estis lastatempe falinta de sia antikva pleno, la kuracarto en Gondoro plu estis saĝa kaj lerta pri kuracado de vundoj kaj difektoj kaj ĉiuj malsanoj, kiujn suferis homoj oriente de la Maro. Krom nur la maljuneco. Ĉar por tio ili trovis neniun kuracon, kaj efektive la longeco de iliaj vivoj jam velkis ĝis nur iomete pli ol ĉe aliaj homoj, kaj tiuj el ili, kiuj preterpasis kun vigleco dek jardekojn estis malmultaj, krom en iuj domoj pli purrasaj. Sed nun iliaj arto kaj klero estis perpleksigitaj; ĉar troviĝis multaj malsanaj pro morbo, kiun ili ne povis kuraci; kaj tiun ili nomis la Nigra Ombro, ĉar ĝi devenis de la nazguloj. Tiuj, kiujn ĝi trafis, malrapide pli kaj pli profunde ekdormis, kaj poste pasis al silento kaj terura malvarmego, kaj tiel mortis. Kaj ŝajnis al la flegantoj, ke la duonulon kaj la Damon de Rohano peze premis tiu morbo. Tamen kelkfoje dum pasado de la mateno ili parolis, murmurante en siaj sonĝoj; kaj la flegantoj aŭskultis ĉion diratan, eble esperante ekscii ion, kio helpus kompreni iliajn afliktojn. Sed baldaŭ ili komencis enfali la mallumon kaj, kiam la suno turniĝis okcidenten, sur iliajn vizaĝojn rampis griza ombro. Sed Faramiro brulis je febro, kiu ne konsentis malpliiĝi.

Gandalfo iris zorgoplena de unu al la alia, kaj al li estis rakontita ĉio, kion la flegantoj aŭdis. Kaj tiel pasis la tago, dum la batalego ekstere daŭris kun ŝanceliĝaj esperoj kaj strangaj novaĵoj; kaj plu Gandalfo atendis kaj rigardis kaj ne eliris; ĝis fine la ruĝa sunsubiro plenigis la tutan ĉielon, kaj la lumo trafenestra falis sur la grizajn vizaĝojn de la malsanuloj. Tiam ŝajnis al la apudstarantoj, ke en la ardo la vizaĝoj ruĝiĝis kvazaŭ pro sano revenanta, sed tio nur estis mokado de la espero.

Tiam maljunulino Joreta, la plej aĝa el la virinoj kiuj servis en tiu domo, rigardante la belan vizaĝon de Faramiro ekploris, ĉar amis lin la tuta popolo. Kaj ŝi diris:

— Ve! se li mortos. Se nur troviĝus reĝoj en Gondoro, kiel siatempe estis laŭdire! Ĉar estas dirite en malnova saĝaĵo: *La reĝaj manoj estas la manoj de kuracisto*. Tiel oni ĉiam povas koni la laŭleĝan reĝon.

Kaj Gandalfo, kiu staris apude, diris:

— La homoj eble memoros longe viajn vortojn, Joreta! Ĉar en ili estas espero. Eble reĝo efektive revenis al Gondoro; aŭ ĉu vi ne aŭdis la strangan novaĵon venintan en la Urbon?

— Mi estis tro okupata pri tio kaj alio por atenti la tutan kriadon kaj vokadon, — ŝi respondis. — Mi nur esperas, ke tiuj murdemaj diabloj ne venos al tiu ĉi Domo kaj ne ĝenos la malsanulojn.

Tiam Gandalfo eliris haste, kaj jam la ĉiela fajro forbruliĝis, kaj la ardaj montetoj velkis, durn cindrogriza vespero rampis sur la kampojn.

Nun kiam la suno estis subiranta, Aragorno, Eomero kaj Imrahilo proksimiĝis al la Urbo kun siaj komandantoj kaj kavaliroj, kaj kiam ili alvenis antaŭ la Pordego, Aragorno diris:

— Vidu la sunon subiranta en granda fajro! Ĝi estas signo de la fino kaj falo de multaj aferoj, kaj ŝanĝiĝo je la tajdoj de la mondo. Sed tiu ĉi Urbo restis komandita de la Regantoj dum multaj longaj jaroj, kaj mi timas, ke se mi enirus ĝin neinvitite, dubo kaj debato eble leviĝus, kiuj ne devus okazi dum tiu ĉi milito. Mi ne eniros, nek starigos ajnan pretendon, ĝis vidiĝos, ĉu venkos ni aŭ Mordoro. Oni starigos miajn tendojn sur la kampo, kaj ĉi tie mi atendos la bonvenigon far la Mastro de la Urbo.

Sed Eomero diris:

— Vi jam levis la standardon de la Reĝoj kaj vidigis la emblemojn de la domo de Elendilo. Ĉu vi permesos, ke tiujn oni defiu?

— Ne, — diris Aragorno. — Sed mi taksas la tempon nematura; kaj mi ne emas al lukto krom kontraŭ nia Malamiko kaj liaj servistoj.

Kaj la princo Imrahilo diris:

— Viaj vortoj saĝas, Mastro, se iu kiu estas parenco de Mastro Denetoro rajtas konsili al vi pri tiu ĉi afero. Li estas fortvola kaj fiera, sed maljuna; kaj lia humoro estis stranga de kiam lia filo estis faligita. Tamen mi ne volus, ke vi restu kiel almozulo ĉe la pordo.

— Ne kiel almozulo, — diris Aragorno. — Ni diru, kiel komandanto de la disiruloj, kiuj ne kutimiĝis al urboj kaj domoj el ŝtono. — Kaj li ordonis, ke lia standardo estu faldita; kaj li demetis la Stelon de la Norda Regno kaj transdonis ĝin por gardado al la filoj de Elrondo.

Tiam princo Imrahilo kaj Eomero de Rohano lasis lin kaj pasis tra la Urbo kaj la tumulto de la popolo, kaj supreniris al la Citadelo; kaj ili venis al la Halo de la Turego, serĉante la Reganton. Sed ili trovis lian seĝon neokupata, kaj antaŭ la podio kuŝis Teodeno, la reĝo de Markio, sur lito ornamita; kaj ĉirkaŭ ĝi staris dek du torĉoj, kaj dek du gardistoj, kavaliroj el Rohano kaj el Gondoro. Kaj la drapaĵoj de la lito estis el verdo kaj blanko, sed sur la reĝo estis sternita ĝis lia brusto la granda tuko ora, kaj sur ĝi lia glavo, kaj ĉepiede lia ŝildo. La lumo de la torĉoj briletis en lia blanka hararo kiel sunlumo en la ŝaŭmo de fontano, sed lia vizaĝo estis bela kaj juna, krom ke sur ĝi esprimiĝis tia paco, kian ne povas atingi la juneco; kaj ŝajnis, ke li dormas.

Post kiam ili staris kelkan tempon silentaj apud la reĝo, Imrahilo diris:

— Kie estas la Reganto? Kaj ankaŭ kie estas Mitrandiro?

Kaj unu el la gardistoj respondis:

— La Reganto de Gondoro estas en la Domoj de Kuracado.

Sed Eomero diris:

— Kie estas Damo Eovina, mia fratino, ĉar ĉu ŝi ne devus kuŝi apud la reĝo, kaj sen ne malpli da honoro? Kien oni metis ŝin?

Kaj Imrahilo diris:

— Sed Damo Eovina ankoraŭ vivis, kiam oni alportis ŝin ĉi tien. Ĉu vi tion ne sciis?

Tiam espero neatendita venis tiel subite al la koro de Eomero, kaj kun ĝi la mordo de zorgo kaj timo renovigitaj, ke li diris nenion pli, sed turnis sin kaj iris rapide el la halo; kaj la princo sekvis lin. Kaj kiam ili eliris, jam vesperiĝis kaj multaj steloj estis sur la ĉielo. Kaj venis Gandalfo piede kaj kun li iu mantelita per grizo; kaj ili renkontiĝis antaŭ la pordo de la Domoj de Kuracado. Kaj ili salutis Gandalfon kaj diris:

— Ni serĉas la Reganton, kaj oni diras, ke li estas en tiu ĉi Domo. Ĉu trafis lin iu damaĝo? Kaj Damo Eovina, kie estas ŝi?

Kaj Gandalfo respondis:

— Ŝi kuŝas interne kaj ne estas mortinta, sed estas proksima al la morto. Sed Mastron Faramiro vundis sago misa, kiel vi aŭdis, kaj li estas nun la Reganto: ĉar foriris Denetoro, kaj lia Domo estas cindrigita. — Kaj plenigis ilin doloro kaj miro pro la historio rakontita.

Sed Imrahilo diris:

— Do el la venko estas forŝirita la ĝojo, kaj ĝi estas amare pagita, se Gondoro kaj Rohano ambaŭ estas samtage rabitaj de siaj estroj. Eomero regas la rohananojn. Kiu regos la Urbon dume? Ĉu ni ne sendu nun por Mastro Aragorno?

Kaj la mantelito ekparolis:

— Li jam venis.

Kaj oni vidis, kiam li enpaŝis la lumon de la ĉeporda lanterno, ke tiu estas Aragorno, volvita per la griza mantelo de Lorieno sur la armaĵo, kaj portanta neniun alian signon ol la verdan ŝtonon de Galadriela.

— Mi venis, ĉar Gandalfo petas tion, — li diris. — Sed dume mi estas nur la Komandanto de la Dunadanoj el Arnoro; kaj la Mastro de Dol Amroto regos la Urbon ĝis vekiĝos Faramiro. Sed mia konsilo estas, ke Gandalfo regu nin ĉiujn en la tagoj sekvontaj kaj dum nia traktado pri la Malamiko. — Kaj tion ili konsentis.

Poste Gandalfo diris:

— Ni ne restu ĉe la pordo, ĉar la tempo urĝas. Ni eniru! Ĉar nur en la alveno de Aragorno restas ajna espero por la malsanuloj kuŝantaj en la Domo. Tiel parolis Joreta, saĝulino de Gondoro: *La reĝaj manoj estas la manoj de kuracisto, kaj tiel oni povas koni la laŭleĝan reĝon*.

Tiam Aragorno eniris la unua, kaj la aliaj sekvis. Kaj tie ĉe la pordo estis du gardistoj en la livreo de la Citadelo: unu alta, sed la alia apenaŭ kun alteco de knabo; kaj vidante ilin, li ekkriis laŭte en surprizo kaj ĝojo.

— Paŝegulo! Kiom belege! Ĉu vi scias, mi konjektis, ke estas vi sur la nigraj ŝipoj. Sed ĉiuj kriis "korsaroj" kaj rifuzis aŭskulti min. Kiel vi faris tion?

Aragorno ridis kaj kaptis la manon de la hobito.

— Vere bela renkontiĝo! — li diris. — Sed ankoraŭ ne estas tempo por vojaĝistaj rakontoj.

Sed Imrahilo diris al Eomero:

— Ĉu tiel ni alparolas niajn reĝojn? Tamen eble li portos sian kronon kun alia nomo!

Kaj Aragorno, aŭdinte lin, sin turnis kaj diris:

— Vere, ĉar en la alta malnova lingvo mi estas *Elesaro*, la Elfŝtono, kaj *Envinjataro* la Renoviganto, — li levis de sia brusto la verdan ŝtonon, kiu kuŝis tie. — Sed Paŝegulo estos la nomo de mia domanaro, se tiu iam estos starigita. En la alta lingvo ĝi ne sonos tiom malbone, kaj *Telkontaro* estos mi kaj ĉiuj miaj heredantoj.

Kaj post tio ili pasis en la Domon; kaj dum ili iris al la ĉambroj, en kiuj oni flegis la malsanulojn, Gandalfo rakontis pri la faroj de Eovina kaj Gajadoko:

— Mi longe staris apud ili, kaj komence ili multe parolis dum sia sonĝado, antaŭ ol sinki en la mortan mallumon. Ankaŭ estas donite al mi vidi multajn aferojn malproksimajn.

Aragorno unue iris al Faramiro, kaj poste al Damo Eovina, kaj laste al Gaja. Rigardinte la vizaĝojn de la malsanuloj kaj vidinte ties dolorojn, li suspiris.

— Ĉi tie mi devos utiligi la tutajn potencon kaj lerton donitajn al mi, — li diris. — Se nur Elrondo estus ĉi tie, ĉar li estas la plejaĝa el nia tuta raso, kaj posedas la plej grandan potencon.

Kaj Eomero, konstatante, ke li estas samtempe malĝoja kaj lacega diris:

— Unue vi devas ripozi, ĉu ne, kaj almenaŭ manĝi iomete. Sed Aragorno respondis:

— Ne, por tiuj tri, kaj plej frue por Faramiro, la tempo elĉerpiĝas. Necesas plej granda rapideco.

Poste li vokis Joretan kaj diris:

— Vi havas stokon da sanigaj herboj en tiu ĉi Domo, ĉu ne?

— Jes, sinjoro, — ŝi respondis, — sed ne sufiĉe, laŭ mia takso, por ĉiuj, kiuj bezonos ilin. Sed certe mi ne scias, kie ni akiros pli, ĉar ĉio misas en tiuj ĉi teruraj tagoj pro fajro kaj bruladoj, kaj la knaboj, kiuj plenumas

komisiojn, tiel malmultas, kaj ĉiuj vojoj estas baritaj. Vidu, jam de tagoj sennombraj neniu ĉaristo venis el Losarnaĥo al la bazaro! Sed ni faras nian plejeblon en la Domo per tio, kion ni havas, kiel certe via moŝto scias.

— Mi prijuĝos tion post la vido, — diris Aragorno. — Ankaŭ alia afero malmultas, tempo por parolado. Ĉu vi havas *atelason*?

— Mi ne scias, vere, moŝto, almenaŭ ne tiunome. Mi iros enketi ĉe la herbmajstro, li konas ĉiujn malnovajn nomojn.

— Oni nomas ĝin ankaŭ *reĝfolio*, — diris Aragorno, — kaj eble vi konas ĝin laŭ tiu nomo, ĉar tiel nomas ĝin la kamparanoj en ĉi lastaj tagoj.

— Ho, tion! — diris Joreta. — Nu, se via moŝto tiel nomus ĝin komence, mi povus diri al vi. Ne, ni havas neniom, mi certas. Vidu, mi neniam aŭdis, ke ĝi posedas iun apartan virton; kaj fakte mi ofte diris al miaj fratinoj, kiam ni trovis ĝin en la arbaro: "reĝfolio, — mi diris, — jen stranga nomo, kaj mi scivolas, kial ĝi estas nomita tiel; ĉar se mi estus reĝo, mi kreskigus plantojn pli helajn en mia ĝardeno". Tamen ĝi odoras agrable kiam pistita, ĉu ne? Se agrable estas la ĝusta vorto: eble pli taŭgas sanige.

— Vere sanige, — diris Aragorno. — Kaj nun, virino, se vi amas Mastron Faramiro, kuru tiel rapide, kiel via lango, kaj akiru por mi reĝfolion, se en la Urbo troviĝas almenaŭ unu folio.

— Kaj se ne, — diris Gandalfo, — mi rajdos al Losarnaĥo kun Joreta malantaŭe, kaj ŝi kondukos min al la arbaro, sed ne al siaj fratinoj. Kaj Ombrofakso instruos al ŝi la signifon de hasto.

Kiam Joreta iris, Aragorno ordonis, ke la ceteraj virinoj varmigu akvon. Poste li kaptis la manon de Faramiro, kaj metis sian alian manon sur la frunton de la malsanulo. Tion kovris ŝvito; sed Faramiro ne moviĝis, nek faris iun ajn indikon, kaj ŝajnis apenaŭ spiri.

— Li preskaŭ elĉerpiĝis, — diris Aragorno, sin turnante al Gandalfo. — Sed tio ne devenas de la vundo. Vidu! tiu resaniĝas. Se li estus trafita de sageto nazgula, li jam tiun nokton mortus. Tiun vundon kaŭzis sudula sago, laŭ mia konjekto. Kiu ĝin eltiris? Ĉu ĝi estas konservita?

— Eltiris ĝin mi, — diris Imrahilo, — kaj ĉesigis sangadon el la vundo. Sed la sagon mi ne retenis, ĉar ĉe ni multo farendis. Ĝi estis laŭ mia memoro ĝuste tia sago, kiajn uzas la suduloj. Tamen mi supozas, ke ĝi venis el la Ombroj supre, ĉar alie liaj febro kaj malsano ne estas kompreneblaj; ĉar la vundo estis nek profunda nek vivminaca. Kiel do vi legas la aferon?

— Laco, doloro pro la patra humoro, vundo, kaj antaŭ ĉio la Nigra Spiro, — diris Aragorno. — Li estas homo fortvola, ĉar li jam proksimiĝis sub la Ombro antaŭ ol li iam rajdis batali sur la eksteraj muroj. Malrapide la malhelo certe lin alrampis, ĝuste dum li luktis kaj klopodis teni sian postenon. Se mi estus ĉi tie pli frue!

Tiumomente venis la herbmajstro kaj diris:

— Via moŝto postulis reĝfolion, kiel nomas ĝin la kamparanoj, aŭ *atelason* laŭ la nobla lingvo, aŭ laŭ tiuj, kiuj iom konas la Valinoran...

— Tion mi postulis, — diris Aragorno, — kaj al mi ne gravas, ĉu vi diras *aseo aranion* aŭ *reĝfolio*, kondiĉe, ke vi havas iom da.

— Pardonu, mastro! — diris la viro. — Mi konstatas, ke vi estas klermajstro, ne nur milita komandanto. Sed ve! sinjoro, ni ne konservas tiun en la Domoj de Kuracado, kie nur la grave vunditaj aŭ malsanaj estas flegataj. Ĉar ĝi havas neniun virton laŭ nia scio, krom eble por dolĉigi fetoran aeron, aŭ forpeli provizoran malviglon. Krom, kompreneble, se vi atentas rimaĵojn pratempajn, kiujn maljunulinoj tiaj, kia nia bona Joreta, plu ripetas senkomprene:

Kiam blovas spir' perforta
kaj kreskas ombro morta
kaj ekas lumforpaso,
venu atelaso, atelaso!
Foriĝu la malsano
per tuŝ' de l' reĝa mano!

Tio estas nur galimatio, bedaŭrinde, fuŝmiksita en la memoro de kadukulinoj. Ties signifon mi lasas al via prijuĝo, se entute ĝi havas tian. Sed gemaljunuloj ankoraŭ uzas infuzaĵon de la herbo kontraŭ kapdoloroj.

— Do nome de la reĝo iru trovi iun maljunulon malpli kleran kaj pli saĝan, kiu konservas iom en sia domo! — kriis Gandalfo.

Nun Aragorno genuis apud Faramiro, kaj tenis la manon sur ties frunto. Kaj la rigardantoj sentis, ke okazas iu luktego. Ĉar la vizaĝo de Aragorno griziĝis pro laco; kaj tiam kaj ĉiam li vokis la nomon de Faramiro, sed ĉiufoje pli mallaŭte al ilia aŭdo, kvazaŭ Aragorno mem estus forigita de ili, kaj marŝus fore en iu malhela valo, vokante iun perditon.

Finfine Bergilo enkuris, kaj li portis ses foliojn volvitajn en tuko.

— Jen estas reĝfolio, moŝto, — li diris, — sed, bedaŭrinde, ne freŝa. Ĝi certe estis plukita antaŭ minimume du semajnoj. Espereble ĝi taŭgos, moŝto? — rigardante Faramiron li ekploris.

Sed Aragorno ridetis.

— Ĝi taŭgos, — li diris. — Jam pasis la plej malbona. Restu kaj konsoliĝu.

Kaptinte du foliojn, li metis ilin sur siajn manojn kaj alspiris ilin, kaj poste li pistis ilin, kaj tuj plenigis la ĉambron vigla freŝeco, kvazaŭ la aero mem vekiĝus kaj vibrus, flagrante pro ĝojo. Kaj poste li ĵetis la foliojn en la bovlojn da vaporanta akvo, alportitaj al li, kaj tuj ĉiuj koroj malŝarĝiĝis. Ĉar

la odoro, kiu venis al ĉiu el ili, similis memoron pri rosaj matenoj je senombra suno en iu lando, pri kiu la bela mondo printempa estas mem nur pasema memoro. Sed Aragorno stariĝis kvazaŭ refreŝigita, kaj liaj okuloj ridetis, dum li tenis la bovlon antaŭ la sonĝanta vizaĝo de Faramiro.

— Ja mirinde! Kiu tion antaŭsupozus? — diris Joreta al virino apudstaranta. — Tiu lolo estas pli efika ol mi supozis. Ĝi memorigas min pri la rozoj de Imloto Meluio, kiam mi estis juna, kaj neniu reĝo rajtus postuli pli bonan.

Subite Faramiro ekmoviĝis, kaj li malfermis siajn okulojn, kaj li rigardis Aragornon, kiu kliniĝis super li; kaj lumo scia kaj ama eklumiĝis en liaj okuloj, kaj li ekparolis mallaŭte:

— Mastro, vi vokis min. Mi venas. Kion ordonas la reĝo?

— Ne plu promenu en la ombroj, sed vekiĝu! — diris Aragorno. — Vi estas laca. Ripozu iom, kaj manĝu, kaj estu preta, kiam mi revenos.

— Mi tion faros, Mastro, — diris Faramiro. — Kiu volus kuŝi senfare post la reveno de la reĝo?

— Do provizore adiaŭ! — diris Aragorno. — Mi devas iri al aliaj, kiuj bezonas min.

Li forlasis la ĉambron kun Gandalfo kaj Imrahilo; sed Beregondo kaj ties filo postrestis, senpovaj por subpremi sian ĝojon. Dum li sekvis Gandalfon kaj fermis la pordon, Grinĉjo aŭdis Joretan ekkrii:

— Reĝo! Ĉu vi aŭdis tion? Kion mi antaŭdiris? La manoj de kuracisto, mi ja diris. — Kaj baldaŭ disiris el la Domo, ke la reĝo efektive revenis inter ilin, kaj post milito li kunportis kuracadon; kaj la novaĵo trakuris la Urbon.

Sed Aragorno venis al Eovina kaj diris:

— Ĉi tie estas grava doloro kaj peza bato. La rompita brako estas flegita per taŭga lerto, kaj post kelka tempo ĝi resaniĝos, se ŝi estas sufiĉe forta por vivi. Vundita estas la ŝildbrako; sed la ĉefa misaĵo venis tra la glavbrako. En ĝi nun ŝajnas neniu vivo, malgraŭ tio, ke ĝi estas nerompita.

» Ve! Ŝi stariĝis kontraŭ malamiko tro forta por ŝiaj menso kaj korpo. Kaj tiuj, kiuj levas armilon kontraŭ tia malamiko, devas esti pli harditaj ol ŝtalo, ke la bato ne detruu ilin. Sorto malbona starigis ŝin sur lian vojon. Ĉar ŝi estas junulino bela, damo plej bela el la domo de reĝinoj. Kaj tamen mi ne scias, kiel mi devus priparoli ŝin. Kiam mi unuafoje rigardis ŝin kaj rimarkis ŝian malĝojon, al mi ŝajnis, ke mi vidas blankan floron starantan rekte kaj fiere, belforman kiel lilio, kaj tamen mi sciis, ke ĝi estas malmola, kvazaŭ prilaborita el ŝtalo de elfaj metiistoj. Aŭ ĉu eble frosto glaciigis ĝian sukon, kaj tial ĝi staris dolĉamare, ankoraŭ videble bela, sed vundita, baldaŭ falonta kaj mortonta? Ŝia malsano komenciĝis longe antaŭ tiu ĉi tago, ĉu ne,

Eomero?

— Mi miras, ke vi demandas min, mastro, — li respondis. — Ĉar mi taksas vin senkulpa en tiu ĉi afero, kiel en ĉio alia; sed mi ne konstatis, ke Eovina, mia fratino, estas frostotuŝita, ĝis ŝi ekvidis vin je la unua fojo. Zorgojn kaj timojn ŝi havis kaj dividis kun mi, dum la tagoj de Vermlango kaj la sorĉado kontraŭ la reĝo; kaj ŝi servis la reĝon en kreskanta timo. Sed tio ne kondukis ŝin al jena krizo!

— Amiko mia, — diris Gandalfo. — Vi havis ĉevalojn, kaj armilajn farojn, kaj liberajn kampojn, sed ŝi, naskite en la korpo de junulino, posedis spiriton kaj kuraĝon minimume egalajn al la viaj. Sed ŝi estis kondamnita prizorgi maljunulon, kiun ŝi amis kiel patron, kaj observi lin falanta en mizeran senhonoran kadukecon; kaj ŝia rolo ŝajnis al ŝi pli malnobla ol tiu de bastono, per kiu li apogis sin.

» Ĉu vi supozas, ke Vermlango venenis nur la orelojn de Teodeno? *Kadukulo! Kio estas la Domo de Eorlo, se ne pajlotegmenta stokejo, kie banditoj drinkas en la stinkaĉo, kaj iliaj bubaĉoj rampaĉas sur la planko inter la hundoj*? Ĉu tiujn vortojn vi ne aŭdis pli frue? Sarumano parolis ilin, la instruinto de Vermlango. Kvankam mi ne dubas, ke Vermlango hejme volvis ties signifon per terminoj pli ruzaj. Mastro, se la amo de via fratino al vi, kaj ŝia volo ankoraŭ direktita al ŝia devo, ne bridus ŝiajn lipojn, vi eble aŭdus eĉ tiajn aferojn eskapi tra ili. Sed kiu scias, kion ŝi diris al la mallumo, sola dum la krizaj horoj de la nokto, kiam ŝia tuta vivo ŝajnis ŝrumpi, kaj la muroj de ŝia laŭbo pli fermiĝis ĉirkaŭ ŝi, budo por enfermi iun sovaĝan estaĵon?

Eomero silentis kaj rigardis sian fratinon, kvazaŭ meditante freŝe pri ĉiuj el la tagoj pasigitaj de ili kune. Sed Aragorno diris:

— Ankaŭ mi vidis tion, kion vi vidis, Eomero. Malmultaj doloroj inter la misokazoj de tiu ĉi mondo enhavas pli da amareco kaj honto por koro vira, ol konstati la amon de damo bela kaj kuraĝa, kiu estas ne reciprokebla. Malĝojo kaj kompato persekutis min ekde kiam mi lasis ŝin senesperan en Dunharo kaj rajdis al la Padoj de l' Mortintoj; kaj sur tiu vojo neniu timo tiel aktualis, kiel la timo pri tio, kio povus okazi al ŝi. Kaj tamen, Eomero, mi diras al vi, ke vin ŝi amas pli senmanke ol min; ĉar vin ŝi amas kaj konas; sed en mi ŝi amas nur ombron kaj penson: esperon pri gloro kaj bravaj plenumoj, kaj landojn malproksime de la kampoj de Rohano. Eble mi kapablas kuraci ŝian korpon kaj revoki ŝin el la malluma valo. Sed mi ne scias al kio ŝi vekiĝos: ĉu al espero, forgeso aŭ malespero. Kaj se al malespero, tiam ŝi mortos, krom se venos alia kuraco, kiun mi ne povas havigi. Ve! ĉar ŝiaj faroj starigis ŝin inter la reĝinojn elstare famajn.

Tiam Aragorno kliniĝis kaj rigardis ŝian vizaĝon, kiu estis blanka kiel

lilio, malvarma kiel frosto, kaj malmola kiel gravurita ŝtono. Sed li kliniĝis, kisis ŝian frunton, kaj alvokis ŝin mallaŭte, dirante:

— Eovina, filino de Eomundo, vekiĝu! ĉar forpasis via malamiko! Ŝi ne moviĝis, sed nun ŝi rekomencis spiri profunde, tiel ke ŝia brusto leviĝis kaj malleviĝis sub la blanka lino de la tuko. Denove Aragorno pistis du foliojn de *atelaso* kaj ĵetis ilin en vaporantan akvon; kaj per tio li lavis ŝian frunton, kaj ŝian dekstran brakon kuŝantan malvarme kaj sennerve sur la litotuko.

Eble Aragorno ja posedis iun forgesitan potencon de Okcidentio, aŭ eble efikis al ili nur liaj vortoj pri Damo Eovina, sed kiam la dolĉa influo de la kuracherbo ŝteliris tra la ĉambro, ŝajnis al la apudstarantoj, ke tra la fenestro blovas akra vento, kaj ĝi alportis neniun aromon, sed la aero estis tute freŝa kaj pura kaj juna, kvazaŭ ĝin neniam antaŭe enspiris ajna vivantaĵo kaj ĝi venis novkreita de neĝokovritaj montoj altaj sub la kupolo de steloj, aŭ de arĝentaj marbordoj en malproksimo lavitaj de ŝaŭmaj maroj.

— Vekiĝu, Eovina, Damo de Rohano! — diris Aragorno, kaj li kaptis per la sia ŝian dekstran manon. — Vekiĝu! La ombro jam foriris kaj ĉio malluma estas lave purigita! — Poste li kuŝigis ŝian manon sur tiun de Eomero kaj forpaŝis. — Voku ŝin! — li diris, kaj li silente eliris el la ĉambro.

— Eovina, Eovina! — kriis Eomero inter siaj larmoj. Sed ŝi malfermis siajn okulojn kaj diris:

— Eomero! Kia ĝojo! Ĉar oni diris, ke vi estas mortigita... Ne, sed tio estis nur la malhelaj voĉoj en mia sonĝo. Kiom longe mi sonĝis?

— Ne longe, fratino mia, — diris Eomero. — Sed ne plu pripensu tion!

— Mi estas strange lacega, — ŝi diris. — Mi devos iom ripozi. Sed diru al mi, kio pri la Mastro de Markio? Ve! ne diru, ke tio estis sonĝo; ĉar mi scias, ke sonĝo ĝi ne estis. Li estas mortinta, kiel li antaŭvidis.

— Li estas mortinta, — diris Eomero, — sed li ordonis, ke mi diru adiaŭon al Eovina, pli kara ol filino. Li nun kuŝas en granda honoro en la Citadelo de Gondoro.

— Tio estas malĝojiga, — ŝi diris. — Kaj tamen ĝi estas pli bona ol ĉio, kion mi riskis esperi dum la malhelaj tagoj, kiam ŝajnis, ke la Domo de Eorlo senhonoriĝis pli ol la budo de ŝafpaŝtisto. Kaj kio pri la reĝa eskviro, la duonulo? Eomero, vi devas nomi lin kavaliro de Rajdmarkio, ĉar li estas bravulo!

— Li kuŝas proksime en tiu ĉi Domo, kaj mi iros al li, — diris Gandalfo. — Eomero restos ĉi tie kelkan tempon. Sed ankoraŭ ne parolu pri milito aŭ malespero ĝis resaniĝo. Vere ĝojige estas vidi vin, tiom kuraĝan damon, ree maldorman antaŭ reveno de sano kaj espero!

— Ĉu sano? — diris Eovina. — Eble estos tiel. Almenaŭ dum troviĝas

malplena selo de iu falinta rajdisto, kiun mi povos plenigi, kaj restas faroj plenumendaj. Sed ĉu espero? Mi ne scias.

Gandalfo kaj Grinĉjo venis al la ĉambro de Gaja, kaj tie ili trovis Aragornon staranta apud la lito.

— Kompatinda Gajĉjo! — kriis Grinĉjo kaj kuris al la lito, ĉar ŝajnis al li, ke lia amiko aspektas pli malbone, kaj grizo estas sur lia vizaĝo, kvazaŭ jaroj da malĝojo pezus sur lin; kaj subite kaptis Grinĉjon timo, ke Gaja mortos.

— Ne timu, — diris Aragorno. — Mi venis ĝustatempe, kaj mi revokis lin. Li nun estas laca kaj malĝoja, kaj li vundiĝis kiel Damo Eovina, aŭdacinte bati tiun minacaĵon. Sed tiuj misaĵoj estas bonigeblaj, ĉar en li estas spirito tre forta kaj gaja. Sian doloron li ne forgesos; sed ĝi ne mallumigos lian koron, ĝi instraos al li saĝon.

Poste Aragorno metis sian manon sur la kapon de Gaja, kaj pasiginte sian manon milde tra la bukloj brunaj, li tuŝis la palpebrojn, kaj vokis lian nomon. Kaj kiam la aromo de la *atelaso* ŝteliĝis tra la ĉambro, kvazaŭ odoro de orkideoj kaj de eriko en sunlumo abeloplena, subite Gaja vekiĝis, kaj diris:

— Mi malsatas. Kioma horo estas?

— Jam post la vespermanĝa horo, — diris Grinĉjo; — kvankam supozeble mi povus alporti ion, se oni permesus.

— Oni ja permesos, — diris Gandalfo. — Kaj cetere ion ajn, kion eble deziras tiu ĉi rajdisto de Rohano, se ĝi estas trovebla en Minaso Tirit, kie oni honoras lian nomon.

— Bone! — diris Gaja. — Tiuokaze mi volas unue vespermanĝon kaj poste pipon. — Sed tuj lia vizaĝo malĝojiĝis. — Ne, ne pipon. Al mi ŝajnas, ke mi neniam plu fumos.

— Kial ne? — diris Grinĉjo.

— Nu, — respondis Gaja malrapide. — Li estas mortinta. Tio revokis al mi la tutan aferon. Li diris, ke li bedaŭras neniam havi eblecon priparoli kun mi la herbokleron. Preskaŭ lia lasta diraĵo. Mi neniam plu povos fumi sen pensoj pri li kaj pri tiu tago, Grinĉjo, kiam li alrajdis Isengardon kaj estis tiom ĝentila.

— Fumu do, kaj pensu pri li! — diris Aragorno. — Ĉar li estis mildkora kaj granda reĝo, kaj li respektis siajn ĵurojn; kaj li leviĝis el la ombroj al lasta bela mateno. Kvankam via servado al li estis mallonga, ĝi devus esti memoro ĝoja kaj honorinda ĝis la fino de viaj tagoj.

Gaja ridetis.

— Nu, do, — li diris, — se Paŝegulo havigos la bezonaĵon, mi fumos kaj pensos. Mi havis en mia tornistro iom el la plejbona de Sarumano, sed

kio okazis al ĝi dum la batalo, mi certe ne scias.

— Mastro Gajadoko, — diris Aragorno, — se vi supozas, ke mi trapasis la montaron kaj la regnon Gondoro kun fajro kaj glavo por alporti herbojn al malzorgema soldato, kiu forĵetas sian ekipaĵon, vi eraras. Se oni ne trovis vian tornistron, tiam vi devos alvoki la herbmajstron de tiu ĉi Domo. Kaj li diros al vi, ke li ne sciis, ke la herbo de vi dezirata posedas iujn virtojn, sed ke la vulgaruloj nomas ĝin *okcidentula lolo*, kaj la nobluloj *galenaso*, kaj aliajn nomojn en la lingvoj pli kleraj, kaj aldoninte kelkajn duone forgesitajn rimaĵojn, kiujn li ne komprenas, li kun bedaŭro informos vin, ke en la Domo troviĝas neniom, kaj li lasos vin pripensi la historion de la lingvoj. Kaj tion nun devas fari mi. Ĉar mi ne dormis en tia lito, de kiam mi forrajdis el Dunharo, nek manĝis depost la mallumo antaŭaŭrora.

Gaja kaptis lian manon kaj kisis ĝin.

— Mi terure bedaŭras, — li diris. — Iru tuj. Ĉiam post tiu nokto en Brio ni estas ĝenaĵo por vi. Sed mia popolo kutimas uzi vortojn leĝerajn en tia situacio kaj diri malpli ol ni intencas. Ni timas trodiri. Tio rabas al ni la ĝustajn vortojn, kiam ŝerco estas maltaŭga.

— Tion mi bone scias, alie mi ne same traktus vin, — diris Aragorno. — Ke la Provinco vivu ĉiam nevelkinte! — Kaj kisinte Gajan li eliris, kaj Gandalfo akompanis lin.

Grinĉjo postrestis.

— Ĉu iam estis iu simila al li? — li diris. — Escepte de Gandalfo, kompreneble. Mi opinias, ke certe ili estas parencaj. Mia kara azeno, via tornistro kuŝas apud via lito, kaj vi portis ĝin sur la dorso, kiam mi renkontis vin. Li vidis ĝin la tutan tempon, kompreneble. Kaj ĉiuokaze ankaŭ mi havas iom. Ek jam! Longfunda Folio ĝi estas. Plenigu la pipon, dum mi kuros aranĝi iom da manĝaĵo. Kaj poste ni trankvilu iomete. Ho ve, ni Tjukoj kaj Brandobokoj, ni ne povas elteni longe sur la altaĵoj.

— Ne, — diris Gaja. — Tion mi ne povas. Ankoraŭ ne, almenaŭ. Sed minimume, Grinĉjo, nun mi povas vidi ilin, kaj honori ilin. Prefere ami unue tion, kion vi kapablas ami, supozeble. Oni devas komenci ie kaj posedi kelkajn radikojn, kaj la grundo de la Provinco profundas. Tamen ekzistas aferoj pli profundaj kaj pli altaj; kaj sen ili neniu oldulo povus kultivi sian ĝardenon en tio, kion li nomas paco, ĉu li scias pri ili aŭ ne. Mi ĝojas, ke mi scias pri ili, iomete. Sed mi ne scias, kial mi tiom paroladas. Kie estas tiu foliaro? Kaj eligu mian pipon el mia tornistro, se ĝi ne estas rompita.

Aragorno kaj Gandalfo iris al la estro de la Domoj de Kuracado, kaj ili konsilis al li, ke Faramiro kaj Eovina restu tie kaj estu flegataj kun zorgo dum multaj tagoj.

— Damo Eovina, — diris Aragorno, — baldaŭ volos leviĝi kaj foriri;

sed tion oni ne devus permesi al ŝi, se vi povos iel malhelpi ŝin, dum almenaŭ dek tagoj.

— Rilate Faramiron, — diris Gandalfo, — li devos baldaŭ ekscii, ke lia patro estas mortinta. Sed la plena historio pri la frenezeco de Denetoro ne estu rakontita al li, ĝis li tute resaniĝos kaj havos devojn plenumendajn. Certigu ke Beregondo kaj la *periano*, kiuj ĉeestis, ankoraŭ ne parolu al li pri tiuj aferoj!

— Kaj la alia *periano*, Gajadoko, kiun mi prizorgas, kio pri li? — diris la domestro.

— Tre probable li jam morgaŭ sufiĉe sanos por leviĝi, — diris Aragorno. — Permesu, ke li tion faru, se li volos. Li rajtos promeni iomete, zorgate de amikoj.

— Rimarkinda raso, — diris la domestro kapjesante. — Tre duraj en la fibroj, mi opinias.

Antaŭ la pordo de la Domoj jam kuniĝis multaj por vidi Aragornon, kaj ili sekvis lin; kaj kiam fine li vespermanĝis, homoj venis kaj petegis, ke li kuracu iliajn parencojn aŭ amikojn, kies vivoj estis minacataj pro doloro aŭ vundo, aŭ kiuj kuŝis sub la Nigra Ombro. Kaj Aragorno stariĝis kaj eliris, kaj li alvokis la filojn de Elrondo, kaj kune ili laboris longe dumnokte. Kaj sciigo trairis la Urbon: “La Reĝo revenis efektive”. Kaj oni nomis lin Elfŝtono, pro la verda ŝtono, kiun li portis, kaj tiel la nomo aŭgurita je lia naskiĝo, ke li portos ĝin, estis elektita por li de lia propra popolo.

Kaj kiam li ne plu povis labori, li volvis sin per sia mantelo, kaj ŝteliris el la Urbo, kaj iris al sia tendo ĝuste antaŭ la tagiĝo kaj dormis iomete. Kaj matene la standardo de Dol Amroto, blanka ŝipo cignosimila sur blua akvo, flosis sur la Turego, kaj la homoj suprenrigardis kaj scivolis, ĉu la alveno de la Reĝo estis nur sonĝo.

9

La lasta debato

Mateno venis post la tago de batalo, kaj ĝi estis bela kun malpezaj nuboj kaj vento turniĝanta okcidenten. Legolaso kaj Gimlio frue eliris kaj petis permeson supreniri en la Urbon, ĉar ili forte volis vidi Gajan kaj Grinĉjon.

— Estas bone scii, ke ili pluvivas, — diris Gimlio, — ĉar ili kostis al ni grandajn penojn dum nia marŝado trans Rohanon, kaj mi ne volus, ke tiaj penoj estu vanaj.

Kune la elfo kaj la gnomo eniris Minason Tirit, kaj vidantoj de ilia preterpaso miris pri tiaj kunuloj; ĉar Legolaso estis belvizaĝa ekster mezureblo de la homoj, kaj li kantis klarvoĉe elfan kanton promenante matene, sed Gimlio paŝis minace apud li karesante sian barbon kaj ĉirkaŭgapante.

— Ĉi tie ekzistas iom da bona masonaĵo, — li diris rigardante la murojn; — sed ankaŭ iom da malpli bona, kaj la stratojn oni povus pli taŭge aranĝi. Kiam Aragorno ricevos sian heredaĵon, mi proponos al li servadon de masonistoj de la Monto, kaj ni rekreos fierinde la urbon.

— Ili bezonas pliajn ĝardenojn, — diris Legolaso. — La domoj estas mortaj, kaj tro malmulto kreskas ĉi tie ĝojante. Se Aragorno ricevos sian heredaĵon, la arbara popolo alportos al li birdojn, kiuj kantas, kaj arbojn, kiuj ne mortas.

Fine ili venis al princo Imrahilo, kaj Legolaso rigardis lin kaj profunde riverencis; ĉar li rimarkis, ke jen efektive estas iu, en kies vejnoj fluas elfa sango.

— Saluton, mastro! — li diris. — Jam delonge la popolo de Nimrodela forlasis la arbarojn de Lorieno, kaj ankoraŭ videblas, ke ne ĉiuj velis okcidenten trans akvon el la haveno de Amroto.

— Tiel estas dirite laŭ la mialandaj legendoj, — diris la princo, — tamen neniam estis vidita tie iu el la helularo dum jaroj nekalkuleblaj. Kaj mi mire vidas tian ĉi tie nun meze de malĝojo kaj milito. Kion vi serĉas?

— Mi estas unu el la Naŭ Kunuloj, kiuj ekvojaĝis kun Mitrandiro el Imladriso, — diris Legolaso, — kaj kun tiu ĉi gnomo, mia amiko, mi venis kun Mastro Aragorno. Sed nun ni volas vidi niajn amikojn, Gajadoko kaj Peregrino, kiuj estas sub via egido, laŭ informoj.

— Vi trovos ilin en la Domoj de Kuracado, kaj mi gvidos vin tien,

— diris Imrahilo.

— Sufiĉos se vi sendos iun por gvidi nin, mastro, — diris Legolaso.

— Ĉar Aragorno sendas al vi jenan mesaĝon. Li ne volas reeniri la Urbon en tiu ĉi tempo. Tamen necesas, ke la komandantoj tuj konsiliĝu, kaj li petas, ke vi kaj Eomero el Rohano subeniru al lia tendaro laŭeble baldaŭ. Mitrandiro jam ĉeestas.

— Mi iros, — diris Imrahilo, kaj ili disiĝis kun ĝentilaj vortoj.

— Tiu estas bela princo kaj granda komandanto de la homoj, — diris Legolaso. — Se Gondoro ankoraŭ disponas tiajn homojn dum ĉi tiuj velkaj tagoj, grandioza certe estis ĝia gloro dum la tagoj de ĝia leviĝo.

— Kaj sendube la bonkvalita masonaĵo estas la pli malnova kaj estis farita dum la unua konstruado, — diris Gimlio. — Ĉiam estas tiel pri la aferoj komencitaj de homoj: okazas frosto dum printempo, aŭ plago dum somero, kaj la aferoj malsukcesas plenumiĝi laŭpromese.

— Tamen malofte ilia semado malsukcesas, — diris Legolaso. — Kaj semo kuŝos en la polvo kaj putros, por poste rekreski en tempoj kaj lokoj neantaŭviditaj. La faroj de la homoj pretervivos nin, Gimlio.

— Kaj tamen en la fino iĝas nur povintusaĵoj, laŭ mia konjekto, — diris la gnomo.

— Pri tio la elfoj ne konas respondon, — diris Legolaso.

Poste servisto de la Princo venis kaj kondukis ilin al la Domoj de Kuracado; kaj tie ili trovis siajn amikojn en la ĝardeno, kaj tiu renkontiĝo estis ĝoja. Dum kelka tempo ili marŝis kaj interparolis, jubilante dum mallonga tempo en trankvilo kaj ripozo sub matena ĉielo supre en la ventozaj cirkloj de la Urbo. Poste, kiam Gaja laciĝis, ili iris sidi sur la muro kun la razeno de la Domoj de Kuracado malantaŭ ili; kaj forsude antaŭ ili Anduino brilis en la sunlumo, dum ĝi fluis for, neatingeble eĉ por la vidkapablo de Legolaso, al la larĝaj platejoj kaj verda nebuleto de Lebenino kaj Suda Itilio.

Kaj nun Legolaso silentiĝis, dum la aliaj parolis, kaj li elrigardis kontraŭ la sunon, kaj rigardante li vidis blankajn marbirdojn urĝantajn kontraŭfluen laŭ la Rivero.

— Vidu! — li kriis. — Mevoj! Ili flugas profunde enlanden. Miro ili estas por mi kaj ĝenas mian koron. Neniam dum mia vivo mi renkontis ilin, ĝis mi venis al Pelargiro, kaj tie mi aŭdis ilin kriantaj en la aero, dum ni rajdis al la batalo de la ŝipoj. Tiam mi staris senmova, forgesante pri la milito en Mez-Tero, ĉar iliaj veantaj voĉoj parolis al mi pri la Maro. La Maro! Ve! Mi ankoraŭ ne vidis ĝin. Sed profunde en la koro de ĉiu mia parenco kuŝas la marnostalgio, kies moviĝo danĝeras. Ve pri la mevoj! Neniun trankvilon mi denove spertos subfage kaj subulme.

— Ne diru tion! — diris Gimlio. — Ekzistas sennombraj aferoj vidotaj en Mez-Tero, kaj grandiozaj verkoj farotaj. Sed se ĉiuj heluloj iros al la havenoj, la mondo estos loko pli malbrila por tiuj, kies sorto estas postresti.

— Malbrila kaj morna, efektive! — diris Gaja. — Vi devos ne iri al la Havenoj, Legolaso. Ĉiam troviĝos iuj, grandaj aŭ malgrandaj, kaj eĉ kelkaj saĝaj gnomoj kiel Gimlio, kiuj bezonas vin. Mi almenaŭ esperas tion. Kvankam mi iel sentas, ke la plej malbona parto de tiu ĉi milito estas ankoraŭ venonta. Kiom mi deziras, ke ĝi estu finita, kaj bone finita!

— Ne tiom sombru! — kriis Grinĉjo. — Brilas la suno, kaj jen ni estas kunaj minimume por unu-du tagoj. Mi deziras aŭdi pli pri vi ĉiuj. Ek, Gimlio! Vi kaj Legolaso aludis vian strangan vojaĝon kun Paŝegulo jam ĉirkaŭ dekfoje hodiaŭ matene. Sed vi rakontis al ni nenion pri ĝi.

— Eble brilas la suno ĉi tie, — diris Gimlio, — sed estas memoroj pri tiu vojo, kiujn mi ne volas revoki el la mallumo. Se mi scius, kio estas antaŭ mi, mi opinias, ke pro neniu ajn amikeco mi laŭirus la Padojn de l' Mortintoj.

— La Padoj de l' Mortintoj? — diris Grinĉjo. — Mi aŭdis Aragornon diri tion, kaj mi scivolis, kion li aludis. Ĉu vi ne rakontu al ni iom pli.

— Ne volonte, — diris Gimlio. — ĉar sur tiu vojo mi spertis honton: Gimlio, filo de Gloino, kiu taksis sin pli fortika ol la homoj, kaj pli eltenema sub la tero ol iu ajn elfo. Sed neniun el ambaŭ mi pruvis, kaj mi estis tenita sur la vojo nur dank' al la volo de Aragorno.

— Kaj ankaŭ pro amo al li, — diris Legolaso. — Ĉar ĉiuj, kiuj ekkonas lin, ekamas lin laŭ sia maniero, eĉ la malvarma rohana junulino. Estis frumatene en la tago antaŭ ol vi venis tien, Gaja, kiam ni forlasis Dunharon, kaj tiom timegis la tuta popolo, ke neniu volis rigardi nian foriron krom Damo Eovina, kiu kuŝas nun dolorigita en la Domo sube. En tiu disiĝo estis malĝojo, kaj vidante tion mi malĝojis.

— Ve! Mia koro turniĝis nur al mi, — diris Gimlio.— Ne! Pri tiu vojaĝo mi ne parolos.

Li silentiĝis, sed Grinĉjo kaj Gaja tiom avidis novaĵojn, ke finfine Legolaso diris:

— Mi rakontos al vi sufiĉon por via trankviliĝo, ĉar mi ne spertis la teruron, kaj mi ne timis la ombrojn de homoj, senpovaj kaj malfortaj laŭ mia takso.

Li rapide rakontis pri la hantita vojo sub la montaro, kaj la malhela renkontiĝo ĉe Ereĥo, kaj la granda rajdo el tie, naŭdek leŭgojn plus tri, ĝis Pelargiro sur Anduino.

— Kvar tagojn kaj noktojn, kaj daŭre la kvinan ni rajdis de la Nigra ŝtono. Kaj jen! en la malhelo de Mordoro nia espero kreskis; ĉar en tiu

malhelo la Ombrarmeo ŝajnis plifortiĝi kaj pli teruraspekti. Iujn mi vidis rajdantaj, iujn paŝegantaj, tamen ĉiuj moviĝis samrapidege. Ili silentis, sed en iliaj okuloj estis ekbrilo. En la altaĵoj de Lamedono ili atingis niajn ĉevalojn, kaj ĉirkaŭis nin, kaj preterpasus nin se Aragorno ne estus malpermesinta tion. Pro lia ordono ili prokrastis. “Eĉ la homaj ombroj obeas lian volon, — mi pensis. — Eble ili tamen servos laŭ liaj bezonoj!”

» Dum unu tago luma ni rajdis, kaj poste venis la tago senaŭrora, kaj plu ni rajdadis, kaj Kirilon kaj Ringlon ni transiris; kaj en la tria tago ni venis al Linhiro super la elfluejo de Gilreno. Kaj tie viroj el Lamedono batalis ĉe la vadejoj kontraŭ minaculoj el Umbaro kaj Harado, kiuj navigis laŭ la rivero. Sed kiel la defendantoj tiel ankaŭ la malamikoj rezignis pri la batalo kaj fuĝis, kiam ni venis, kriegante ke la Reĝo de la Mortintoj venis. Nur Angboro, la reganto de Lamedono, sufiĉe kuraĝe toleris nin, kaj Aragorno ordonis, ke li ordigu sian armeon kaj postsekvu, se ili aŭdacos, kiam la Griza Armeo forpasos.

» — Ĉe Pelargiro la Heredanto de Isilduro bezonos vin, — li diris.

» Tiel ni transiris Gilrenon, pelante antaŭ ni la aliancanojn de Mordoro; kaj poste ni ripozis iomete. Sed baldaŭ Aragorno stariĝis, dirante: “Vidu! Jam Minaso Tirit estas atakata. Mi timas, ke ĝi pereos antaŭ ol ni alvenos por helpi ĝin”. Do ni denove surseliĝis antaŭ forpaso de la nokto, kaj pluiris sur la ebenaĵoj de Lebenino per la tuta rapideco, kiun niaj ĉevaloj kapablis elteni.

Legolaso paŭzis kaj suspiris, kaj turninte la okulojn suden li mallaŭte kantis:

Arĝente fluas rojoj de Celos ĝis Erui
en verdaj kampoj de Lebenino!
Altas la herboj tie. Pro l’ vent’ demara
balanciĝas blankaj lilioj,
kaj oraj sonoriloj skuiĝas de malosoj kaj alfiroj
en verdaj kampoj de Lebenino,
pro l’ vento demara!

» Verdas tiuj kampoj en la kantoj de mia popolo, sed tiam ili malhelis, grizaj dezertoj en la nigro antaŭ ni. Kaj tra la vasta lando, tretante senzorge la herbojn kaj la florojn, ni ĉasis niajn malamikojn dum unu tago kaj unu nokto, ĝis ni venis je l’ amara fino al la Granda Rivero. Tiam en mia koro mi pensis, ke ni proksimiĝas al la maro; ĉar larĝa estis la akvo en la mallumo, kaj sennombraj marbirdoj kriĉis sur ĝiaj bordoj. Ve pri la meva kriĉado! Ĉu la Damo ne diris, ke mi gardu min kontraŭ ilin? Kaj nun mi ne povas forgesi ilin.

— Miaparte mi tute ne atentis ilin, — diris Gimlio; — ĉar tiam ni venis finfine al serioza batalo. Tie ĉe Pelargiro estis la ĉefŝiparo el Umbaro, kvindek grandaj ŝipoj kaj nekalkuleblaj malpli grandaj. Multaj el niaj ĉasatoj atingis la havenojn antaŭ ni, kaj kunportis sian timon; kaj iuj el la ŝipoj ekfuĝis, celante eskapi laŭ la Rivero aŭ atingi la kontraŭan bordon; kaj multaj el la pli malgrandaj flambrulis. Sed la haradanoj, pelitaj al la prudentorando, turniĝis por finbatali, kaj pro senespero ili estis ferocaj; kaj ili ridis vidante nin, ĉar ili estis armeo ankoraŭ granda.

» Sed Aragorno haltis kaj kriis per voĉo potenca: “Venu nun! Je la Nigra Ŝtono mi alvokas vin!” Kaj subite la Ombra Armeo, kiu lastatempe postrestis, venis kiel griza tajdo, forbalaante ĉion antaŭ si. Mallaŭtajn kriojn ni aŭdis, kaj forajn kornojn blovatajn, kaj murmuron kvazaŭ de sennombraj malproksimaj voĉoj: tio similis eĥon de iu forgesita batalo dum la Malhelaj Prajaroj. Palaj glavoj elingiĝis, sed mi ne scias, ĉu ties klingoj ankoraŭ mordus, ĉar la Mortintoj ne plu bezonis alian armilon krom timigo. Neniu povis kontraŭstari ilin.

» Ili venis al ĉiu ŝipo, kiu estis albordigita, kaj poste ili transiris la akvon al la ankritaj; kaj ĉiujn maristojn plenigis frenezo de teruro kaj ili saltis en la akvon, krom nur la sklavoj ĉenitaj al la remiloj. Senzorge ni rajdis inter niaj fuĝantaj malamikoj, pelante ilin kvazaŭ foliojn, ĝis ni alvenis la bordon. Kaj tiam al ĉiu granda ŝipo restinta Aragorno sendis po unu dunadano, kaj ili konsolis la surŝipajn kaptitojn kaj instigis ilin formeti la timon kaj esti liberaj. Antaŭ la fino de tiu malluma tago neniu restis el la malamikoj por rezisti: ĉiuj dronis aŭ fuĝis suden esperante trovi la propran landon perpiede. Strange kaj mirinde mi taksis, ke la projektojn de Mordoro povis renversi tiaj fantomoj el timo kaj mallumo. Per la propraj armiloj ĝi estis venkita!

— Efektive strange, — diris Legolaso. — En tiu horo mi rigardis Aragornon kaj pensis, kia granda kaj terura Mastro li povintus estiĝi pro la forto de sia volo, se li prenus al si la Ringon. Ne senmotive Mordoro timas lin. Sed pli nobla estas lia spirito ol la kompreno de Saŭrono; ĉar ĉu li ne estas el la idoj de Lutiena? Neniam pereos tiu linio, eĉ se la jaroj plimultiĝos nekalkuleble.

— Tiuj aŭguroj estas ekster la okuloj de la gnomoj, — diris Gimlio. — Sed ja potenca estis Aragorno tiutage. Jen! la tuta nigra ŝiparo estis en liaj manoj; kaj li elektis por si la plej grandan ŝipon, kaj ni suriris ĝin. Poste li sonorigis grandan nombron da trumpetoj prenitaj de la malamikoj; kaj la Ombra Armeo reiris sur la bordon. Tie ili staris silentaj, apenaŭ videblaj krom pro ruĝa brileto en la okuloj, kiuj spegulis la lumon de la brulantaj ŝipoj. Kaj Aragorno parolis laŭtvoĉe al la Mortintoj, kriante:

» — Aŭdu nun la vortojn de la Heredanto de Isilduro! Via ĵuro estas plenumita. Retroiru kaj neniam plu ĝenu la valojn! Foriru kaj ripozu!

» Kaj tiam la Reĝo de la Mortintoj stariĝis antaŭ la amaso kaj rompis sian lancon kaj ĵetis ĝin teren. Poste li profunde riverencis kaj forturnis sin; kaj rapide la tuta griza amaso retroiris kaj malaperis kvazaŭ nebuleto repuŝita per subita vento; kaj ŝajnis al mi, ke mi vekiĝas el sonĝo.

» Tiunokte ni ripozis, dum laboris aliaj. Ĉar multaj kaptitoj estis liberigitaj, kaj multaj sklavoj senkatenigitaj, kiuj estis gondoranoj kaptitaj dum rabatakoj; kaj baldaŭ estis ankaŭ granda kuniĝo de homoj el Lebenino kaj Etiro, kaj Angboro el Lamedono venis kun ĉiuj rajdistoj, kiujn li sukcesis reordigi. Nun, kiam timo pri la Mortintoj estis forigita, ili venis por helpi nin kaj rigardi la Heredanton de Isilduro; ĉar informo pri tiu nomo disvastiĝis kvazaŭ fajro en mallumo.

» Kaj tio proksimas al la fino de nia rakonto. Ĉar dum tiuj vespero kaj nokto multaj ŝipoj estis pretigitaj kaj hompleniĝis; kaj matene la ŝiparo ekvelis. Tio nun ŝajnas longe pasinta, tamen estis nur matene en la antaŭhieraŭo, la sesa tago post kiam ni elrajdis el Dunharo. Sed ankoraŭ Aragornon pelis timo, ke tro urĝas la tempo. “Temas pri kvardek leŭgoj plus du de Pelargiro ĝis la albordiĝejoj ĉe Harlondo, — li diris. — Tamen al Harlondo ni devos veni morgaŭ aŭ tute fiaski”.

» La remilojn nun manipulis liberaj homoj, kaj virece ili penadis; tamen malrapide ni pasis laŭ la Granda Rivero, ĉar ni penis kontraŭ ties fluo, kaj kvankam tiu ne estas rapida en la sudo, ni ricevis neniom da helpo per vento. Peza estintus mia koro, se Legolaso ne ridus subite.

» — Supren la barbo, posteulo de Durino! — li diris. — Ĉar tiel estas dirite: *Espero ofte naskiĝas, kiam ĉio fiaskas*. Sed kian esperon li vidis de malproksime, tion li rifuzis diri. Kiam venis la nokto, ĝi nur pliprofundigis la mallumon, kaj niaj koroj ardis, ĉar fore en la nordo ni vidis ruĝan ardon sub la nubo, kaj Aragorno diris: “Minaso Tirit brulas”. Sed noktomeze espero efektive naskiĝis denove. Marspertaj viroj de Etiro rigardante suden parolis pri ŝanĝiĝo venonta kun freŝa vento de la maro. Longe antaŭ la mateniĝo la masthavaj ŝipoj hisis la velojn, kaj nia rapido kreskis, ĝis aŭroro blankigis la ŝaŭmon antaŭ niaj pruoj. Kaj tiel estis, kiel vi jam scias, ke ni venis je la tria horo de la mateno kun favora vento kaj senvualigita suno, kaj ni malvolvis la grandan standardon en batalo. Tio estis tago grandioza kaj grandioza horo, sekvu kio ajn.

— Sekvu kio ajn, grandiozaj faroj ne estas senvalorigataj, — diris Legolaso. — Faro grandioza estis rajdado sur la Padoj de l’ Mortintoj, kaj grandioza ĝi restos, eĉ se neniu restos en Gondoro por prikanti ĝin en la venontaj tagoj.

— Kaj tio tre povos okazi, — diris Gimlio. — ĉar la vizaĝoj de Aragorno kaj Gandalfo seriozas. Multe mi scivolas, kiaj konsiliĝoj okazas en la tendoj tie sube. Miaparte, kiel Gaja, mi sopiras, ke pro nia venko la milito jam estu finita. Tamen kio ajn restas farota, mi esperas partopreni ĝin, pro honoro de la popolo de l' Soleca Monto.

— Kaj mi pro la popolo de la Granda Arbaro, — diris Legolaso, — kaj pro la amo al la Mastro de la Blanka Arbo.

Poste la kunuloj silentiĝis, sed dum kelka tempo ili sidis tie sur la alta loko, ĉiu okupata pri la propraj pensoj, dum la Komandantoj debatis.

Kiam princo Imrahilo disiĝis de Legolaso kaj Gimlio, li tuj vokis Eomeron, kaj ili duope subeniris el la Urbo, kaj ili venis al la tendoj de Aragorno, starigitaj sur la kampo ne malproksime de kie pereis reĝo Teodeno. Kaj tie ili konsiliĝis kune kun Gandalfo kaj Aragorno kaj la filoj de Elrondo.

— Miaj sinjoroj, — diris Gandalfo, — aŭskultu la vortojn de la Reganto de Gondoro antaŭ ol li mortis: *Vi eble triumfos sur la kampoj de Pelenoro dum unu tago, sed nevenkeblas la Potenco nun leviĝanta*. Mi ne diras, ke vi malesperu, kiel li faris, sed pripensu la veron en tiuj ĉi vortoj.

» La ŝtonoj de Vidado ne mensogas, kaj eĉ la Mastro de Baraduro ne povas mensogigi ilin. Li povas, eble, laŭ sia volo elekti, kiajn aferojn vidu mensoj pli malfortaj, aŭ igi, ke ili miskomprenu la viditaĵon. Malgraŭ tio ne estas dubeble, ke kiam Denetoro vidis grandajn amasojn ordigitajn kontraŭ li en Mordoro, kaj ankoraŭ pliajn kunigatajn, li vidis tion, kio vere estas.

» Nia forto sufiĉis nur por forbati la unuan grandan atakon. La sekva estos pli granda. Tiu ĉi milito malhavas finan esperon, kiel Denetoro perceptis. Venkon ne povas akiri armiloj, ĉu vi sidas ĉi tie por toleri sieĝon post sieĝo, aŭ elmarŝas por esti pereigitaj trans la Rivero. Vi havas nur elekton inter misaĵoj; kaj la prudento konsilus, ke vi plifortigu tiajn fortikejojn kiajn vi disponas, kaj tie atendu la sturmon, ĉar tiel la tempo antaŭ via pereo estos iom plilongigita.

— Do vi volas, ke ni retretu al Minaso Tirit, aŭ Dol Amroto, aŭ Dunharo, kaj sidu tie kvazaŭ infanoj sur sablokasteloj, kiam la tajdo flusas, ĉu? — demandis Imrahilo.

— Tiu konsilo neniel estus nova, — diris Gandalfo. — Ĉu vi ne faris tion kaj malmulton plian dum la tagoj de Denetoro? Sed ne! Mi diris, ke tio estus prudenta. Prudenton mi ne konsilas. Mi diris, ke venkon ne povas akiri armiloj. Mi plu esperas pri venko, sed ne per armiloj. Ĉar en la mezon de ĉiuj ĉi politikaĵoj venas la Ringo de Potenco, la fundamento de Baraduro, kaj la espero de Saŭrono.

» Koncerne ĉion ĉi, miaj sinjoroj, vi ĉiuj scias sufiĉe por kompreni nian

malfeliĉan staton, kaj tiun de Saŭrono. Se li reakiros ĝin, via kuraĝo estos vana, kaj lia venko okazos rapide kaj komplete: tiel komplete, ke neniu povos antaŭvidi ĝian finon, dum tiu ĉi mondo ekzistos. Se ĝi estos detruita, tiam li pereos, kaj li falos tiel profunden, ke neniu povas antaŭvidi lian releviĝon. Ĉar li perdos la plejparton de tiu forto, kiu estas propra al li de lia komenco, kaj ĉio kreita aŭ komencita per tiu potenco diseriĝos, kaj li estos eterne senkorpigita, kaj estiĝos nura spirito de malico, kiu sin mordos en la ombroj, sed neniam denove povos kreski aŭ enkorpiĝi. Kaj tiel estos forigita la granda misaĵo de tiu ĉi mondo.

» Eble venos aliaj misaĵoj, ĉar Saŭrono mem estas nura servanto aŭ sendito. Tamen ne estas nia rolo mastri ĉiujn periodojn de la mondo, sed fari ion, en kiu ni estas, por savi tiujn jarojn, en kiuj ni estas lokitaj, elradikigante la misherbojn en la kampoj, kiujn ni konas, tiel ke la postvivontoj povu disponi puran grundon por kultivi. La vetero, kiun ili spertos, ne estas sub nia rego.

» Nu, ĉion ĉi Saŭrono scias, kaj li scias, ke tiu trezoro, kiun li perdis, estas retrovita, sed li ankoraŭ ne scias, kie ĝi estas, aŭ ni tiel esperas. Kaj tial li nun forte dubemas. Ĉar se ni trovis tiun aĵon, inter ni estas kelkaj sufiĉe fortaj por utiligi ĝin. Ankaŭ tion li scias. Ĉar ĉu mi ne prave konjektas, Aragorno, ke vi montris vin al li en la ŝtono de Ortanko?

— Mi tion faris antaŭ ol forrajdi el Kornburgo, — respondis Aragorno. — Mi taksis la tempon matura, kaj ke la Ŝtono venis al mi ĝuste tiucele. Tiam jam pasis dek tagoj de kiam la Ringoportanto iris orienten de Raŭroso, kaj la Okulo de Saŭrono, mi opiniis, devus esti fortrenita el la propra lando. Tro malofte li estis defiita, de kiam li reiris al sia Turego. Kvankam mi antaŭvidis, kiom rapida estos lia responda atako, eble mi ne devis aŭdaci montri min. Apenaŭ sufiĉe da tempo estis donita al mi por veni kaj helpi vin.

— Sed kiel estas? — demandis Eomero. — Ĉio estas vana, laŭ vi, se li havas la Ringon. Kial li supozu ne vana alsturmi nin, se ni ĝin posedas?

— Li ankoraŭ ne certas, — diris Gandalfo, — kaj li ne amasigis sian potencon por atendado ĝis liaj malamikoj estas sekuraj, kiel faris ni. Cetere ni ne povus lerni dum unu tago, kiel utiligi la plenan potencon. Efektive, ĝin povas utiligi nur unu sola mastro, ne multaj; kaj li atendos tempon de kverelado, antaŭ ol unu el la granduloj inter ni igos sin mastro kaj subŝovos ĉiujn aliajn. Dum tiu tempo la Ringo eble helpus lin, se li subitus.

» Li rigardadas. Multon li vidas kaj multon aŭdas. Liaj nazguloj plu disvagas. Ili preterpasis super ĉi tiu kampo antaŭ la sunleviĝo, kvankam malmultaj el la lacaj aŭ dormantaj rimarkis ilin. Li studas la signojn: Glavo, kiu senigis lin de lia valoraĵo, estas rekreita; la ventoj de fortuno turniĝis por

favori nin, kaj la neatendita malsukceso de lia unua sturmo; la pereo de lia granda Komandanto.

» Lia dubemo certe kreskas, dum ni interparolas ĉi tie. Lia Okulo nun streĉiĝas niadirekten, blinda al preskaŭ ĉio alia, kio moviĝas. Tion ni devas konservi. En tio troviĝas nia tuta espero. Jen do mia konsilo. La Ringon ni ne havas. Saĝe aŭ malsaĝege, ĝi estas forsendita por esti detruita, ke ĝi ne detruu nin. Sen ĝi ni ne povas per forto venki lian forton. Sed ni devas ĉiupreze forturni lian Okulon de lia vera danĝero. Ni ne povas venki per armiloj, sed per armiloj ni povas havigi al la Ringoportanto ties solan eblon, kvankam ĝi estas fragila.

» Kiel Aragorno komencis, tiel ni devas daŭrigi. Ni devas puŝi Saŭronon al lia lasta provo. Ni devas elvoki lian kaŝitan forton, por ke li malplenigu sian propran landon. Ni devas senprokraste elmarŝi renkonten al li. Ni devas fari el ni logaĵon, eĉ se liaj makzeloj fermiĝos ĉirkaŭ nin. Li glutos tiun logaĵon, en espero kaj en avido, ĉar li supozas, ke en tia malzorgo li vidas la orgojlon de la nova Ringmastro, kaj li diros: “Do! Li etendas sian kolon tro frue kaj tro distancen. Li proksimiĝu kaj jen mi havos lin en kaptilo, el kiu li ne povos eskapi. Tie mi dispremos lin, kaj tio, kion li impertinente prenis, estos mia denove kaj poreterne”.

» Ni devas marŝi apertokule en tiun kaptilon, kun kuraĝo, sed kun malmulte da espero pri ni mem. Ĉar, miaj sinjoroj, tre povas esti, ke ni mem tute pereos en nigra batalo malproksime de l’ vivantaj landoj; tiel ke eĉ se Baraduro estos faligita, ni ne travivos por vidi novan epokon. Sed tio, laŭ mia opinio, estas nia devo. Kaj pli bona ol tamen detruiĝi — kio nepre okazos, se ni sidos ĉi tie — kaj scii mortante, ke nova epoko ne estiĝos.

Ili silentis kelkan tempon. Finfine Aragorno parolis:

— Kiel mi komencis, tiel mi daŭrigos. Ni venas nun ĝis la rando mem, kie parencas espero kaj malespero. Ŝanceliĝi signifas fali. Neniu nun rifuzu la konsilojn de Gandalfo, kies longa laboro kontraŭ Saŭrono venas finfine al sia pruviĝo. Sen li ĉio estus jam delonge perdita. Tamen mi ne pretendas ankoraŭ komandi iun ajn. Aliaj elektu laŭ sia volo.

Tiam diris Elrohiro:

— El la nordo ni venis ĝuste tiucele, kaj ni venigis la saman konsilon de nia patro Elrondo. Ni ne retroiros.

— Koncerne min, — diris Eomero, — mi scias malmulton pri tiuj profundaj aferoj; sed tion mi ne bezonas. Jenon mi scias, kaj estas sufiĉe, ke kiel mia amiko Aragorno savis min kaj mian popolon, tiel mi helpos lin, kiam li vokas. Mi kuniros.

— Koncerne min, — diris Imrahilo, — mi taksas Mastron Aragorno mia feŭdestro, ĉu li pretendas tion aŭ ne. Lia volo estas por mi ordono. Ankaŭ

mi kuniros. Tamen provizore mi staras sur la loko de l' Reganto de Gondoro, kaj mi devas pripensi unuavice la bonstaton de ĝia popolo. Al prudento oni devas ankoraŭ direkti iom da atento. Ĉar ni devas prepariĝi por ĉiuj ebloj, bonaj kaj misaj. Nu, eble ni triumfos, kaj dum restas iom da espero pri tio, Gondoro devos esti defendata. Mi ne volas, ke ni revenu venkinte al la Urbo ruinigita kaj lando prirabita malantaŭ ni. Kaj tamen ni eksciis de la rohananoj, ke ankoraŭ troviĝas armeo ne kontraŭbatalita ĉe nia norda flanko.

— Tio estas vera, — diris Gandalfo. — Mi ne konsilas, ke vi lasu la Urbon senhoma. Fakte la armeo, kiun ni gvidos orienten, ne devas esti sufiĉe multnombra por ajna serioza sturmo de Mordoro, sed ĝi estu sufiĉe granda por defii al batalo. Kaj ĝi devos baldaŭ ekmoviĝi. Tial mi demandas al la komandantoj: kian armeon ni povus kunmeti kaj elkonduki post maksimume du tagoj? Kaj tiuj devas esti viroj fortikaj, kiuj ekiras volonte, konante sian danĝeron.

— Ĉiuj lacegas, kaj tre multaj suferis vundojn ĉu malgravajn ĉu gravajn, — diris Eomero, — kaj ni suferis perdon de multaj ĉevaloj, kaj tio estas malfacile tolerebla. Se necesas rajdi baldaŭ, mi ne povas esperi, ke mi kondukos eĉ du milojn, kaj tamen postlasi sufiĉajn por defendo de la Urbo.

— Enkalkulindas ne nur tiuj, kiuj batalis sur tiu ĉi kampo, — diris Aragorno. — Nova forto estas survoje el la sudaj provincoj nun, kiam la marbordo estas pribalaita. Kvar milojn mi ekspedis marŝe el Pelargiro tra Losarnaĥo antaŭ du tagoj; kaj Angboro la Sentima rajdas antaŭ ili. Se ni ekiros post du tagoj, ili proksimiĝos antaŭ ol ni ekvojos. Cetere al multaj estis ordonite sekvi min sur la Rivero sur iu ajn akirebla boato, kaj per tiu ĉi vento tiuj baldaŭ venos, efektive pluraj boatoj jam venis al Harlondo. Mi kalkulas, ke ni elkondukos sep mil rajdistojn kaj infanterianojn, kaj tamen lasos la Urbon pli bone defendata ol ĝi estis, kiam komenciĝis la sturmo.

— La Pordego estas detruita, — diris Imrahilo, — kaj kie nun estas la faklerto por rekonstrui kaj restarigi ĝin.

— En Ereboro, la Reĝlando de Daino, troviĝas tia lerto, — diris Aragorno; — kaj se ĉiuj niaj esperoj ne pereos, poste en konvena tempo mi sendos Gimlion, filon de Gloino, por peti metiistojn de la Montaro. Sed homoj estas superaj al pordoj, kaj neniu pordo eltenos kontraŭ nia malamiko, se la homoj forlasos ĝin.

Tio do estis la fino de la estra debato: ke ili ekvojos en la dua mateno post tiu tago, kun sep mil, se tiom estos troveblaj; kaj la plimulto el tiu armeo estos marŝantoj, pro la misaj landoj, en kiuj ili iros.

Aragorno devos trovi proksimume du milojn el tiuj, kiujn li kunigis en la sudo; sed Imrahilo devos trovi tri milojn kaj duonon; kaj Eomero kvin

centojn el la rohananoj, kiuj estis senĉevaligitaj sed militkapablaj, kaj li mem devos gvidi kvincenton da siaj plej bonaj surĉevalaj rajdistoj; kaj alia trupo el kvincent rajdistoj devos esti, inter kiuj rajdos la dunadanoj kaj la kavaliroj el Dol Amroto, sume ses mil infanterianoj kaj mil rajdistoj. Sed la ĉefa forto de la rohananoj, kiuj havis ĉevalojn kaj kapablis batali, entute tri miloj sub la gvido de Elfhelmo, devos embuski la Okcidentan Vojon kontraŭ la malamikojn, kiuj estis en Anorieno. Kaj tuj rapidaj rajdantoj estis elsenditaj por laŭeble akiri informojn norden kaj orienten, al Osgiliado kaj la vojo al Minaso Morgul.

Kaj kiam ili jam kalkulis sian tutan forton kaj pripensis la vojaĝon entreprenotan kaj la vojojn nepre elektotajn, Imrahilo subite ekridis laŭte.

— Ĉu ne? Tio estas la plej granda ŝerco en la tuta historio de Gondoro, ke ni elrajdos kun sep miloj, apenaŭ tiom, kiom en la avangardo de nia armeo en la tagoj de l' potenco, por ataki la montojn kaj la nepenetreblan pordegon de la Nigra Lando! Eble tiel infano minacus armaĵitan kavaliron per pafarko el ŝnuro kaj nematura salikaĵo! Se la Malhela Mastro scias tion, kion vi asertas, Mitrandiro, ĉu li ne prefere ridetos ol timos, kaj dispremos nin per sia etfingro kiel muŝon, kiu provas piki lin?

— Ne, li klopodos kapti la muŝon kaj forigi la pikilon, — diris Gandalfo. — Kaj inter ni estas personoj, kiuj valoras pli ol po mil armaĵitaj kavaliroj. Ne, li ne ridetos.

— Ankaŭ ni ne, — diris Aragorno. — Se tio ĉi estas ŝerco, ĝi estas tro amara por ridigi. Ne, ĝi estas la lasta moviĝo en danĝerego, kaj al iu flanko aŭ alia ĝi havigos la finon de la ludo. — Li elingigis Andurilon kaj levis ĝin ekbrilantan en la sunlumo. — Vi ne plu eningiĝos ĝis la lasta batalo estos decidita, — li diris.

10

La Nigra Pordego malfermiĝas

Du tagojn poste la armeo de la Okcidento estis komplete kunigita sur Pelenoro. Amasego da orkoj kaj orientuloj estis returniĝinta el Anorieno, sed incitite kaj disigite de la rohananoj, ili frakasiĝis kaj fuĝis kun malmulta batalado al Kairo Andros; kaj pro tiu minaco detruita kaj nova forto venanta el la sudo la Urbo estis sufiĉe bone garnizonita. Skoltoj raportis, ke neniuj malamikoj restis sur la vojo oriente ĝis la Krucvojo de la Falinta Reĝo. Ĉio jam pretis por la lasta ĵeto.

Legolaso kaj Gimlio estis denove rajdontaj kune en la trupo de Aragorno kaj Gandalfo, kiuj iris en la avangardo kun la dunadanoj kaj la filoj de Elrondo. Sed Gaja hontis ne akompani ilin.

— Vi ne sufiĉe sanas por tia vojaĝo, — diris Aragorno. — Sed ne hontu. Se vi nenion plu faros en tiu ĉi milito, vi jam meritis grandan honoron. Peregrino iros kaj reprezentos la Provincon; kaj ne domaĝu al li lian danĝereblecon, ĉar kvankam li faris tiel bone, kiel permesis lia fortuno, li ankoraŭ ne egalas vian faron. Sed vere ĉiuj nun same estas en danĝero. Kvankam eble nia rolo estos trafi malĝojan finon antaŭ la Pordego de Mordoro, se tio okazos, tiam ankaŭ vi venos ĝis lasta konfrontiĝo, ĉu ĉi tie aŭ kie ajn la nigra tajdo ĝisatingos vin. Adiaŭ!

Kaj do deprimite Gaja nun staris kaj rigardis la ordigon de la armeo. Kun li estis Bergilo, kaj ankaŭ tiu estis deprimita; ĉar lia patro estis marŝonta estronte kompanion de la urbaj viroj: li ne povis realiĝi al la gardistaro, ĝis estos prijuĝita lia proceso. En tiu sama kompanio estis ironta Grinĉjo, kiel soldato de Gondoro. Gaja povis vidi lin ne malproksime, eta sed rekta figuro inter la altuloj de Minaso Tirit.

Finfine sonoris la trumpetoj, kaj la armeo komencis formoviĝi. Trupo post trupo, kaj kompanio post kompanio, ili turniĝis kaj foriris orienten. Kaj dumlonge post kiam ili forpasis el videbleco laŭ la granda vojo al la Digvojo, Gaja staris tie. La lasta ekbrilo de la matena sunlumo sur lancoj kaj kaskoj flagris kaj perdiĝis, kaj daŭre li restis kun la klinita kapo kaj peza koro, sentante sin senamika kaj soleca. Ĉiu, kiun li amis, foriris en tiun malhelon pendantan antaŭ la fora orienta ĉielo; kaj malmulta espero restis en lia koro, ke li iam revidos iun ajn el ili.

Kvazaŭ revokita pro la senespera humoro, la doloro en lia brako revenis, kaj li sentis sin malforta kaj maljuna, kaj la sunlumo ŝajnis maldensa. Lin

rekonsciigis tuŝo per la mano de Bergilo.

— Venu, sinjoro periano! — diris la knabo. — Vi ankoraŭ spertas doloron, mi vidas. Mi helpos vin reiri al la kuracistoj. Sed ne timu! Ili revenos. La homoj de Minaso Tirit neniam estos venkitaj. Kaj nun ili havas Mastron Elfŝtono, kaj ankaŭ Beregondon el la gardistaro.

Antaŭ la tagmezo la armeo venis al Osgiliado. Tie ĉiuj disponeblaj laboristoj kaj metiistoj estis okupataj. Iuj riparis la pramojn kaj boatajn pontojn, kiujn la malamikoj konstruis kaj parte detruis, kiam ili fuĝis; iuj kolektis provianton kaj rabaĵon; kaj aliaj ĉe la orienta flanko trans la Rivero haste starigis defendaĵojn.

La avangardo pluiris tra la ruinoj de Malnova Gondoro, kaj trans la larĝan Riveron, kaj plu laŭ la longa rekta vojo, kiu en la altaj tagoj estis farita ekde la bela Turego de la Suno al la alta Turego de la Luno, kiu nun estis Minaso Morgul en ĝia malbenita valo. Je kvin mejloj post Osgiliado ili haltis, kompletiginte sian marŝon de la unua tago.

Sed la rajdistoj peliĝis antaŭen kaj antaŭ la vespero ili venis ĝis la Krucvojo kaj la ringego da arboj, kaj ĉio estis silenta. Neniun signon pri malamikoj ili vidis, neniu krio aŭ voko estis aŭdita, neniu sago fulmis el roko aŭ densejo apud la vojo, tamen ĉiam dum ili iris antaŭen ili sentis plifortiĝon de la landa gvatado. Arboj kaj ŝtonoj, herberoj kaj folioj estis aŭskultantaj. La malhelo estis dispelita, kaj en la fora okcidento sunsubiro tuŝis la valon de Anduino, kaj la blankaj pintoj de la montoj ruĝiĝis en la blua aero; sed ia ombro kaj morno ŝvebis sur Efelo Duad.

Tiam Aragorno starigis trumpetistojn po unu ĉe la kvar vojoj etendiĝantaj en la arboringegon, kaj tiuj laŭte fanfaris, kaj la heroldo laŭte kriis: “Revenis la Mastroj de Gondoro, kaj ili reprenas ĉion, kio estas ilia en tiu ĉi lando”. La hida orka kapo starigita sur la ĉizita figuro estis deĵetita kaj disrompita, kaj la kapo de la malnova reĝo estis levita kaj starigita denove sur sia loko, ankoraŭ kronita je floroj blankaj kaj oraj; kaj homoj laboris por forlavi kaj forskrapi ĉiujn fiskribojn, kiujn orkoj surŝtonigis.

Nu, dum la konsiliĝo iuj proponis, ke Minaso Morgul estu atakita la unua, kaj se ili sukcesus kapti ĝin, ĝi estu komplete detruita.

— Kaj eble, — diris Imrahilo, — la vojo kondukanta de tie al la pasejo supre pruviĝos pli facila atakvojo kontraŭ la Malhela Mastro ol lia norda pordego.

Sed kontraŭ tion Gandalfo parolis urĝe, pro la misaĵoj loĝantaj en tiu valo, kie la mensoj de homaj vivantoj freneziĝus kaj hororiĝus, kaj ankaŭ pro la novaĵo alportita de Faramiro. Ĉar se la Ringoportanto efektive iris tiun vojon, tiam antaŭ ĉio ili ne tiru tien la Okulon de Mordoro. Do la postan tagon, kiam la ĉefarmeo venis, ili starigis fortan gardistaron ĉe la

Krucvojo por certigi iom da defendo, se Mordoro sendus trupon tra la pasejo de Morgulo, aŭ aligus pliajn soldatojn el la sudo. Por tiu gardado ili elektis plejparte arkpafistojn, kiuj konis la terenon de Itilio kaj kiuj kuŝos kaŝe en la arbaroj kaj deklivoj ĉirkaŭ la vojrenkontiĝo. Sed Gandalfo kaj Aragorno rajdis kun la avangardo al la enirejo de la Morgula Valo kaj rigardis la fian urbegon.

Ĝi estis malluma kaj senviva, ĉar la orkoj kaj aliaj kreitoj kiuj loĝis tie, estis detruitaj dum la batalo, kaj la nazguloj forestis. Tamen la etoso de la valo estis peza je timo kaj malamikeco. Tiam ili frakasis la fian ponton, fajrigis ruĝajn flamojn en la fetoraj kampoj kaj foriris.

La postan tagon, kiu estis la tria tago post la ekiro el Minaso Tirit, la armeo komencis sian marŝadon norden sur la vojo. Laŭ tiu vojo estis proksimume cent mejloj de la Krucvojo ĝis Moranono, kaj neniu sciis, kio eble okazos al ili antaŭ la alveno tiel malproksime. Ili iris malkaŝe sed singarde, kun surĉevalaj skoltoj antaŭe sur la vojo, kaj aliaj piedirantaj ambaŭflanke, precipe ĉe la orienta flanko, ĉar tie etendiĝis mallumaj densejoj, kaj malorda tero el rokaj ravinetoj kaj apikaĵoj, malantaŭ kiuj grimpis supren la longaj severaj deklivoj de Efelo Duad. La vetero daŭre favoris en la mondo, kaj la vento plu blovis el la okcidento, sed nenio kapablis forblovi la mornojn kaj la tristajn nebuletojn, kiuj kroĉiĝis ĉirkaŭ la Montoj de Ombro; kaj malantaŭ ili de tempo al tempo leviĝis fumegoj kaj ŝvebis en la superaj ventoj.

De tempo al tempo Gandalfo sonorigis la trumpetojn, kaj la heroldoj kriis: “La Mastroj de Gondoro estas venintaj! ĉiuj forlasu tiun ĉi landon aŭ kapitulacu!” Sed Imrahilo diris:

— Ne diru “la Mastroj de Gondoro”. Diru “Reĝo Elesaro”. Ĉar tio estas vera malgraŭ tio, ke li ankoraŭ ne sidiĝis sur la trono; kaj plipensigos la Malamikon, se la heroldoj uzos tiun nomon.

Kaj poste trifoje ĉiutage la heroldoj proklamis la venon de Reĝo Elesaro. Sed neniu respondis al la defio.

Tamen, kvankam ili marŝis ŝajne en paco, la koroj de la tuta armeo, de la plej altranga ĝis la plej senranga, estis deprimitaj, kaj je ĉiu mejlo, kiun ili pasis norden, aŭguro pri misaĵoj pli peze ŝarĝis ilin. Estis proksime ai la fino de l’ dua tago de ilia marŝado post la Krucvojo, kiam ili la unuan fojon renkontis ian batalproponon, ĉar forta trupo da orkoj kaj orientuloj klopodis kapti la avangardajn kompaniojn en embusko; kaj tio estis ĝuste en la sama loko, kie Faramiro embuskis la homojn el Harado, kaj la vojo trairis profundan fendegon tra elstaraĵo de la orientaj montetoj. Sed la trupestroj de la Okcidento estis bone avertitaj de siaj skoltoj, lertuloj el Heneto Anun estrataj de Mablungo, kaj la embusko mem estis kaptita. Ĉar rajdistoj larĝe

ĉirkaŭiris okcidente kaj alvenis flanke de la malamikoj kaj de malantaŭe, kaj tiuj estis detruitaj aŭ pelitaj orienten en la montetaron.

Sed la venko malmulte kuraĝigis la komandantojn.

— Tio estas nura finto, — diris Aragorno, — kaj ĝia ĉefa celo, miaopinie, estis prefere logi nin antaŭen pro malvera konjekto pri malforto de la Malamiko ol multe damaĝi nin provizore.

Ekde tiu vespero venis nazguloj kaj sekvis ĉiun moviĝon de la armeo. Ili ankoraŭ flugis altege kaj nevideble de ĉiuj krom Legolaso, tamen ilia ĉeesto estis sentebla, kiel plifortiĝo de ombro kaj malheliĝo de la suno; kaj kvankam la ringofantomoj ankoraŭ ne falatakis malalten kontraŭ siaj malamikoj kaj silentis, eligante neniun krion, timo pri ili ne estis forskuebla.

Tiel tempo kaj la senespera vojaĝo forpasis. Je la kvara tago post la Krucvojo kaj la sesa el Minaso Tirit ili venis finfine al la ekstremo de la loĝataj landoj, kaj ekeniris la dezerton, kuŝantan antaŭ la pordoj de la pasejo Cirito Gorgor; kaj ili povis vidi la marĉojn kaj la senkreskaĵejon, kiuj etendiĝis norden kaj okcidenten al Emin Muilo. Tiel dezertaj estis tiuj lokoj kaj tiel profunda la hororo kuŝanta sur ili, ke iuj el la armeo perdis sian kuraĝon, kaj tiuj povis nek rajdi nek marŝi pluen al la nordo.

Aragorno rigardis ilin, kaj en liaj okuloj estis pli da kompato ol kolero, ĉar tiuj estis junuloj el Rohano, el fora Ŭestfaldo, aŭ terkulturistoj el Losarnaĥo, kaj por ili Mordoro estis ekde l' infanaĝo nomo misa, kaj tamen nereala, legendo, kiu ne koncernis ilian simplan vivon; kaj nun ili marŝis kvazaŭ homoj en hida sonĝo realigita, kaj ili ne komprenis tiun ĉi militon nek kial la sorto kondukis ilin ĝis tia travivaĵo.

— Iru! — diris Aragorno. — Sed retenu tiom da honoro, kiom vi kapablas, kaj ne kuru! Ekzistas tasko, kiun vi eble provu por ne esti komplete hontigitaj. Celu sud-okcidenten ĝis Kairo Andros, kaj se ĝin ankoraŭ okupas malamikoj, kiel mi supozas, tiam rekaptu ĝin, se vi povos, kaj okupu ĝin ĝis la fino defende al Gondoro kaj Rohano!

Tiam iuj hontigitaj de lia indulgo venkis sian timon kaj pluiris, kaj la ceteraj ekesperis denove, aŭdinte pri vireca faro, al kiu ili povis sin turni, kaj ili foriris. Kaj tiel, ĉar multaj soldatoj estis jam lasitaj ĉe la Krucvojo, okazis ke kun malpli ol ses miloj la Komandantoj de la Okcidento venis finfine por defii la Nigran Pordegon kaj la potencon de Mordoro.

Ili iris antaŭen malrapide, atendante ĉiuhore respondon al sia defio, kaj ili rekuniĝis ĉar estus nura malŝparo de soldatoj elsendo de skoltoj aŭ grupetoj for de la ĉefarmeo. Je noktiĝo en la kvina marŝtago post la Morgula Valo ili starigis sian lastan tendaron kaj metis fajrojn ĉirkaŭe el tia morta ligno kaj eriko, kian ili povis trovi. Ili pasigis la noktohorojn maldorme kaj konsciis pri multaj aĵoj duonvideblaj, kiuj marŝis kaj

ŝtelvagadis ĉie ĉirkaŭe, kaj ili aŭdis hurladon de lupoj. La vento ĉesis kaj la tuta aero ŝajnis senmova. Malmulton ili povis vidi, ĉar kvankam mankis nuboj kaj la kreskanta luno jam aĝis kvar noktojn, troviĝis fumoj kaj haladzoj leviĝantaj el la tero kaj la blankan krescenton vualis la nebuletoj de Mordoro.

Malvarmiĝis. Matene la vento denove ekblovis, sed ĝi nun venis el la nordo, kaj baldaŭ ĝi plifortiĝis al akcelanta blovado. Jam foriris la noktovagintoj, kaj la tereno ŝajnis malplena. Norde inter fetoraj putoj kuŝis la unua el la amasegoj kaj montetoj da skorio kaj frakasita rokaĵo kaj eksplodita grundo, la vomaĵo de la larvuloj de Mordoro; sed sude kaj jam proksime baŭmis la granda remparo de Cirito Gorgor, kaj meze la Nigra Pordego, kaj la du Turegoj de l' Dentoj altaj kaj malhelaj ambaŭflanke. Ĉar dum sia lasta marŝo la komandantoj forturnis sin de la malnova vojo, kiam ĝi deviis orienten kaj evitis la danĝeron de la embuskaj montetoj, kaj sekve nun ili alproksimiĝis al Moranono de la nord-okcidento, samkiel faris Frodo.

La du vastaj metalaj pordoklapoj de la Nigra Pordego estis firme fermitaj sub sia brovumanta arkaĵo. Sur la remparo nenio estis videbla. Ĉio estis silenta sed atenta. Ili jam alvenis la lastan ekstremon de sia foleco kaj staris senespere kaj frostante en la griza lumo de l' frua tago antaŭ turegoj kaj muroj, kiujn ilia armeo ne povus sturmi esperoplene, eĉ se ĝi alportus tien maŝinojn grandpotencajn, kaj la malamiko disponus neniom pli da forto ol sufiĉus por garnizoni nur la pordegon kaj la muron. Sed ili sciis, ke ĉiuj montetoj kaj rokejoj ĉirkaŭ Moranono estas plenaj je kaŝitaj malamikoj, kaj la ombreca deklivo transe estas borita kaj tunelita de svarmantaj kovaĵoj da miskreaĵoj. Kaj starante ili vidis ĉiujn nazgulojn kuniĝintaj, ŝvebantaj vulturece super la Turegoj de l' Dentoj; kaj ili sciis, ke ili estas gvatataj. Sed daŭre la Malamiko donis neniun signon.

Neniu elekto restis al ili krom ludi ĝisfine sian rolon. Tial Aragorno nun aranĝis la armeon laŭ la plejeble konvena maniero; kaj ili estis ordigitaj sur du grandaj amasegoj de eksploditaj ŝtonoj kaj grundo, kiujn la orkoj amasigis dum jaroj da laboro. Antaŭ ili direkte al Mordoro kuŝis kvazaŭ ĉirkaŭfosaĵo marĉego el fumanta koto kaj fetoraj lagetoj. Kiam ĉio estis ordigita, la Komandantoj forrajdis al la Nigra Pordego kun multnombra gardistaro kaj la standardo kaj heroldoj kaj trumpetistoj. Tie estis Gandalfo kiel ĉefheroldo, kaj Aragorno kun la filoj de Elrondo, kaj Eomero el Rohano, kaj Imrahilo; ankaŭ al Legolaso, Gimlio kaj Peregrino estis ordonite kuniri, tiel ke ĉiuj malamikoj de Mordoro havu atestanton.

Ili venis ĝis aŭdodistanco de Moranono kaj malvolvis la standardon, kaj blovis siajn trumpetojn; kaj la heroldoj antaŭenpaŝis kaj sendis siajn voĉojn

supren trans la remparon de Mordoro.

— Elvenu! — ili kriis. — La Mastro de la Nigra Lando elvenu! Justecon li spertos. Ĉar li maljuste militis kontraŭ Gondoro kaj forrabis ties terojn. Pro tio la Reĝo de Gondoro postulas, ke li kompensu siajn misfarojn kaj foriru porĉiame. Elvenu!

Sekvis longa silento, kaj nek de muro nek de pordo aŭdiĝis krio aŭ sono. Sed Saŭrono jam pretigis siajn planojn, kaj li emis priludi tiujn musojn kruele antaŭ ol bati mortige. Tial okazis, ke kiam la komandantoj estis sin forturnontaj, la silento subite estis rompita. Aŭdiĝis longa grumblado de tamburegoj kiel tondro en la montaro, kaj poste blekado de kornoj, kiuj skuis la ŝtonojn mem kaj kontuzis la orelojn de la homoj. Kaj je tio pordo meze de la Nigra Pordego estis ĵetmalfermita kun laŭta tintego kaj elvenis ambasado el la Nigra Turego.

Ĉekape rajdis alta kaj misega figuro sur nigra ĉevalo, se tio estis ĉevalo, ĉar ĝi estis grandega kaj hida, kaj ĝia vizaĝo estis terura masko, pli simila al kranio ol al viva kapo, kaj en la orbitoj de la okuloj kaj en la naztruoj brulis flamo. La rajdanto estis tute nigre vestita, kaj nigris lia alta kasko; tamen li estis ne ringofantomo, sed vivanta homo. La komandanto de la Turego Baraduro li estis, kaj lian nomon memoris neniu rakonto, ĉar li mem forgesis ĝin kaj li diris: “Mi estas la Buŝo de Saŭrono”. Sed oni rakontis, ke li estis renegato, kiu devenis de la raso de tiuj, kiuj nomiĝis la nigraj numenoranoj, ĉar ili starigis siajn loĝejojn en Mez-Tero dum la jaroj de la regado de Saŭrono, kaj ili adoris lin, ĉar ili enamiĝis al miskleriĝo. Kaj li eniris servadon de la Nigra Turego kiam ĝi frue releviĝis, kaj pro sia ruzemo li ĉiam plialtiĝis en favoro de la Mastro, kaj li lernis grandan sorĉadon, kaj multe konis la menson de Saŭrono; kaj li pli kruelis ol ajna orko.

Ĝuste li nun elrajdis, kaj kun li venis nur eta trupo da nigre armaĵitaj soldatoj kaj unusola standardo, nigra sed surhavanta en ruĝo la Misfaran Okulon. Haltinte je kelkaj paŝoj antaŭ la Komandantoj el la Okcidento, li inspektis ilin supren-suben kaj ridis.

— Ĉu en tiu ĉi bandaĉo estas iu aŭtoritatulo taŭga por trakti kun mi? — li demandis. — Aŭ iu sufiĉe sagaca por kompreni min? Ĉiuokaze ne vi! — li mokis, sin turnante malestime al Aragorno. — Por krei reĝon necesas pli ol peco da elfa vitro, aŭ tia bandaĉo. Vidu, iu ajn bandito en la montaro povas vidigi sekvantaron simile imponan.

Aragorno nenion respondis, sed li rigardis la okulojn de l’ alia kaj kroĉis la rigardon, kaj dum momento ili tiel interluktis; sed baldaŭ, kvankam Aragorno nek moviĝis nek metis manon al armilo, la alia ŝanceliĝis kaj retropaŝis, kvazaŭ bate minacita.

— Mi estas heroldo kaj ambasadoro, kaj oni ne rajtas ataki min! — li ekkriis.

— Kie tiaj leĝoj validas, — diris Gandalfo, — estas ankaŭ kutime, ke ambasadoroj malpli impertinentas. Sed neniu minacis vin. Nenio timindas ĉe ni ĝis kompletiĝos via komisio. Sed se via mastro ne akiris novan saĝecon, tiam vi kun ĉiuj liaj servantoj troviĝos en granda danĝero.

— Do! — diris la mesaĝisto. — Sekve vi estas la proparolanto, maljuna grizbarbulo, ĉu? Ĉu ni ne aŭdis pri vi kelkfoje, kaj pri viaj vagadoj, ĉiam kovanta komplotojn kaj damaĝojn en sekura malproksimo? Sed ĉi-foje vi elŝovis tro foren vian nazon, Mastro Gandalfo, kaj vi vidos, kio okazas al tiu, kiu starigas siajn malsaĝajn araneaĵojn antaŭ la piedojn de Saŭrono la Granda. Mi havas signojn, kiujn oni ordonis montri al vi — precipe al vi, se vi aŭdacus veni.

Li gestis al unu el la gardistoj, kaj tiu paŝis antaŭen portante pakaĵon volvitan per nigraj tukoj.

Tiujn la mesaĝisto metis flanken, kaj tie, mirigante kaj konsternante ĉiujn Komandantojn, li montris unue tian mallongan glavon, kian portis Sam, kaj poste grizan mantelon kun elfa broĉo, kaj fine la mitrilan maŝkirason, kiun Frodo portis volvite en siaj ĉifitaj vestaĵoj. Nigro kovris iliajn okulojn, kaj ŝajnis al ili dum momenta silento, ke la mondo senmoviĝas, sed iliaj koroj svenis kaj la lasta espero malaperis. Grinĉjo, kiu staris malantaŭ princo Imrahilo, saltis antaŭen kun dolorkrio.

— Silentu! — diris Gandalfo severe, retroŝovante lin, sed la mesaĝisto laŭte ridis.

— Do vi havas kun vi ankoraŭ alian el tiuj nanoj! Kian utilon vi konstatas en ili, mi ja ne divenas, sed sendi ilin spioni en Mordoron preterpaŝas eĉ vian kutiman stultecon. Tamen mi dankas lin, ĉar evidente minimume tiu bubaĉo pli frue vidis tiujn ĉi signojn, kaj estus vane se vi nun malakceptus ilin.

— Mi ne volas malakcepti ilin, — diris Gandalfo. — Efektive mi konas ilin kaj ilian tutan historion, kaj malgraŭ via rikanado, fia Buŝo de Saŭrono, tion vi ne povas pretendi. Sed kial vi alportis ilin ĉi tien?

— Gnoma kiraso, elfa mantelo, klingo el la pereinta Okcidento, kaj spiono el la eta ratlando Provinco... Ne, ne surpriziĝu! Ni konas kornplete tion: jen la markoj de konspiro. Nu, eble tiu, kiu portis ĉi aĵojn, estis kreito pro kies perdo vi ne funebros, kaj eble male: eble, iu kara por vi? Se jes, rapide konsiliĝu laŭ tiu malmulto da sagaco, kiu restas al vi. Ĉar Saŭrono ne amas spionojn, kaj lia estonta sorto jam dependas de via elekto.

Neniu respondis al li; sed li vidis iliajn vizaĝojn grizaj pro timo kaj la teruriĝon en iliaj okuloj, kaj li denove ridis, ĉar ŝajnis al li, ke lia ludo iras

kontentige.

— Bone, bone! — li diris. — Li estis kara al vi, mi vidas. Aŭ eble lia komisio estis tia, kian vi ne volis malsukcesinta, ĉu? Ĝi tamen malsukcesis. Kaj nun li eltenos la malrapidan turmenton dum jaroj, tiel longe kaj malrapide, kiel povos rimedi niaj artoj en la Granda Turego, kaj neniam liberiĝos, krom eble kiam li estos ŝanĝita kaj rompita tiel ke li venu al vi, kaj vi vidos tion, kion vi respondecis. Tio ĉi certe okazos, krom se vi akceptos la kondiĉojn de mia Mastro.

— Listu la kondiĉojn, — diris Gandalfo senŝancele, sed la apudstarantoj vidis la angoron sur lia vizaĝo, kaj nun li ŝajnis maljuna ŝrumpinto, kunpremita, finfine venkita. Oni ne dubis, ke li akceptos.

— Jen la kondiĉoj, — diris la mesaĝisto kaj ridetis rigardante ilin unu post la alia. — La bandaĉo de Gondoro kaj ties mislogitaj aliancanoj tuj retroiros trans Anduinon, unue ĵurinte neniam plu ataki armile Saŭronon la Grandan, ĉu malkaŝe, ĉu sekrete. Ĉiuj terenoj oriente de Anduino apartenos al Saŭrono por ĉiam, nure. Okcidente de Anduino ĝis la Nebulecaj Montoj kaj la Breĉo de Rohano estos tributantoj de Mordoro, kaj tie la homoj ne portos armilojn, sed havos permeson regi siajn proprajn aferojn. Sed ili helpos rekonstrui Isengardon, kiun ili sovaĝe detruis, kaj tiu apartenos al Saŭrono, kaj tie loĝos lia komandanto: ne Sarumano, sed iu pli fidinda.

Rigardante la okulojn de la mesaĝisto ili komprenis lian penson. Li estos tiu komandanto, kaj kunigos ĉion restantan el la Okcidento sub sian regadon: li estos ilia tirano kaj ili liaj sklavoj.

Sed Gandalfo diris:

— Tio estas postuli multon kontraŭ livero de unu servisto: ke via mastro ricevu interŝanĝe ion, pro kio li devos aliokaze militi multfoje! Aŭ ĉu la batalkampo de Gondoro detruis liajn militesperojn, tiel ke li turnas sin al marĉando? Kaj se efektive ni taksus tiel alte la kaptiton, kian certecon ni havos, ke Saŭrono, la Fia Mastro de Perfidemo, plenumos sian flankon? Kie estas tiu kaptito? Oni elkonduku lin kaj transdonu lin al ni, kaj tiam ni pripensos tiujn postulojn.

Al la atentema Gandalfo ŝajnis, kiel al skermanto kontraŭ mortigema oponulo, ke dum spirlongo la mesaĝisto estas konsternita, tamen li rapide denove ridis:

— Ne ĵetu vortojn insolentajn al la Buŝo de Saŭrono! — li kriis. — Certecon vi deziras! Saŭrono tion ne donas. Se vi petegos lian indulgon, unue vi devos obei lin. Tiuj estas liaj kondiĉoj. Akceptu aŭ malakceptu!

— Tiujn ni akceptos! — diris Gandalfo subite. Li forĵetis sian mantelon kaj blanka lumo elradiis kvazaŭ glavo en tiu malhela loko. Antaŭ lia levita mano la mesaĝisto retropaŝis kaj Gandalfo proksimiĝinte kaptis kaj

forprenis de li la signojn: kiraso, mantelo kaj glavo. — Tiujn ni prenos memore pri nia amiko. Sed koncerne viajn kondiĉojn, ni tute rifuzas ilin. Foriru, ĉar via komisio finiĝis kaj morto apudas al vi. Ĉi tien ni venis ne por malŝpari vortojn traktante kun Saŭrono, senfida kaj malbenita, tiom malpli kun iu el liaj sklavoj. Foriru!

Tiam la mesaĝisto de Mordoro ne plu ridis. Lia vizaĝo tordiĝis pro miro kaj kolero ĝis ĝi similis iun sovaĝbeston kiu, kaŭrante sur sia predo, estas batita ĉe la makzelo per doloriga vergo. Koleregо plenigis lin kaj lia buŝo bavis, kaj senformaj furiozaj sonoj venis strangole el lia faŭko. Sed li rigardis la minacajn vizaĝojn de la Komandantoj kaj ties mortigemajn okulojn, kaj timo venkis lian koleregon. Li eligis laŭtan krion, turniĝis, sursaltis sian ĉevalon, kaj kun sia trupo retrogalopis freneze al Cirito Gorgor. Sed dumire liaj soldatoj blovis siajn kornojn laŭ signalo delonge aranĝita; kaj eĉ antaŭ ol ili atingis la pordon, Saŭrono fermis sian kaptilon.

Tamburoj tondris kaj fajroj impetis supren. La granda pordego de Moranono larĝe svingmalfermiĝis. Tra ĝi elfluis granda armeo tiel rapide, kiel kirlaj akvoj kiam kluzklapo estas levata.

La Komandantoj denove surĉeваliĝis kaj retrorajdis, kaj el la armeo de Mordoro aŭdiĝis nova kriego. Polvo leviĝis sufoke en la aeron dum deproksime almarŝis armeo de orientanoj, kiuj atendis la signalon en la ombroj de Eredo Litui malantaŭ la pli fora turego. Suben de sur la montaroj ambaŭflanke de Moranono verŝiĝis nenombreblaj orkoj. La okcidentanoj estis enretigitaj, kaj baldaŭ, ĉie ĉirkaŭ la grizaj teramasoj, sur kiuj ili staris, potencoj dekoble kaj pli ol dekoble pli grandaj ol la ilia, ringos ilin en maro de malamikoj. Saŭrono prenis la proponitan logaĵon en ŝtalajn makzelojn.

Malmulta tempo restis al Aragorno por ordigi la batalfronton. Sur la unua monteto li staris kun Gandalfo, kaj tie bela kaj senespera estis hisita la standardo de la Arbo kaj Steloj. Sur la alia monteto tutproksima staris la standardoj de Rohano kaj Dol Amroto: Blanka Ĉevalo kaj Arĝenta Cigno. Kaj ĉirkaŭ ĉiu monteto estis starigita ringo frontanta ĉiudirekten, hirta je lancoj kaj glavoj. Sed antaŭe direkte al Mordoro, de kie venos la unua severa atako, staris la filoj de Elrondo maldekstre kun dunadanoj ĉirkaŭ ili, kaj dekstre princo Imrahilo kun la viroj de Dol Amroto altaj kaj belaj, kaj elektitaj viroj el la Turego de Gardado.

Blovis la vento, la trumpetoj sonoris, kaj sagoj siblis; sed la suno nun supreniranta al la sudo, estis vualita per la fumoj de Mordoro, kaj tra minaca nebuleto ĝi ekbrilis, forega, paŭta ruĝo, kvazaŭ temus pri tagfino, aŭ la fino eble de la tuta mondo de lumo. Kaj el la debutanta malhelo venis la nazguloj kun malvarmaj voĉoj kriantaj vortojn de morto; kaj tiam ĉiu espero estingiĝis.

Grinĉjo kliniĝis hororpremite, kiam li aŭdis Gandalfon rifuzi la kondiĉojn kaj kondamni Frodon al turmento en la Turego; sed li regis sin, kaj nun li staris apud Beregondo en la unua vico de Gondoro kun la soldatoj de Imrahilo. Ĉar ŝajnis al li preferinde morti baldaŭ kaj lasi la amaran historion de sia vivo, tial ke ĉio ruiniĝis.

— Se nur Gaja estus ĉi tie, — li aŭdis sin diri, kaj rapidaj pensoj hastis tra lia menso, ĝuste dum li rigardis la malamikojn impeti al atako: "Nu, nu, jam ĉiuokaze mi komprenas kompatindan Denetoron iom pli bone. Ni eble mortus kune, Gaja kaj mi, ĉar ni devos morti, kial ne? Nu, tial ke li ne ĉeestas, mi esperas, ke lin trafos fino pli facila. Sed nun mi devas fari mian plejeblon".

Li elingigis sian glavon kaj rigardis ĝin kaj la interplektiĝajn formojn el ruĝo kaj oro; kaj la fluaj literoj de Numenoro flagris fajrece sur la klingo. "Ĝi estas forĝita ĝuste por tiu horo, — li pensis. — Se mi nur povus bati tiun fian mesaĝiston per ĝi, tiam mi preskaŭ egaliĝus al Gajĉjo. Nu, mi batos kelkajn el ĉi bruta kovaĵo antaŭ la fino. Se nur mi povus vidi denove friskan sunlumon kaj verdajn herbojn!"

Ĝuste dum li pensis tiel, la unua sturmo karambolis kun ili. La orkoj malhelpataj de la marĉoj antaŭ la montetoj haltis kaj pafis siajn sagojn en la defendajn vicojn. Sed tra ili venis paŝegante, blekante brutece, granda trupo de montetaj troloj el Gorgoroto. Pli altaj kaj pli larĝaj ol homoj ili estis, kaj ili estis vestitaj nur per strikta maŝkiraso el kornecaj skvamoj, aŭ eble tio estis ilia hida haŭto; sed ili portis rondajn ŝildojn enormajn kaj nigrajn kaj svingis pezajn martelojn per siaj nodozaj manoj. Senskrupule ili saltis en la lagetojn kaj travadis, blekante dum la alveno. Kvazaŭ ŝtormo ili inundis la vicon de la gondoranoj kaj batis kaskojn kaj kapojn, brakojn kaj ŝildojn, kvazaŭ forĝistoj prilaborantaj la ardan kurbiĝan feron. Apud Grinĉjo Beregondo estis senkonsciigita kaj transpaŝita, kaj li falis; kaj la granda ĉeftrolo, kiu batis lin, kliniĝis super lin etendante kroĉan krifon, ĉar tiuj fikreitoj kutimis mordi la gorĝojn de tiuj, kiujn ili faligis.

Tiam Grinĉjo batis supren, kaj la surskribita okcidenta klingo trapikis la haŭton kaj profunde eniris la organojn de la trolo, kaj ties nigra sango elsputegis. Li ŝanceliĝis antaŭen kaj kraŝis kvazaŭ falanta roko, kovrante tiujn, kiuj estis sube. Nigro kaj fetoro kaj prema doloro inundis Grinĉjon, kaj lia menso forsvenis en nigregon.

"Tiel tio finiĝas laŭ mia antaŭsupozo", — li pensis forflagrante. Kaj tiu penso iomete ridis en li dumfuĝe, ŝajne preskaŭ gaja ĉar formetanta finfine ĉiajn dubojn kaj zorgojn kaj timojn. Kaj tiam ĝuste forflugante en forgeson li aŭdis voĉojn, kaj tiuj ŝajnis krii en iu forgesita mondo forsupre.

— La agloj venas! La agloj venas!

Ankoraŭ unu momenton ŝvebis la penso de Grinĉjo: “Bilbo! Sed ne! Tio venis el lia rakonto, antaŭ tre longe. Tio estas mia rakonto, kaj ĝi jam finiĝis. Adiaŭ!” Kaj lia penso flugis foren kaj liaj okuloj nenion pli vidis.

LA SESA LIBRO



1. Golfo de Ljuno

2. Grizaj Havenoj
3. La Provinco
4. Malnova Arbaro
5. Veterverto
6. Rivendelo
7. Pordo de Morio
8. Isengardo
9. Iridaj Kampoj
10. Lorieno
11. Dol Gulduro
12. Minaso Tirit
13. Minaso Morgul
14. Breĉo de Rohano

1

La turego de Cirito Ungol

Sam levis sin dolorplene de sur la tero. Momente li scivolis, kie li estas, kaj poste revenis al li la tutaj mizero kaj senespero. Li estis en la profunda malhelo antaŭ la suba enirejo de la orka fortikaĵo; ties latuna pordo estis fermita. Verŝajne li falis senkonscia, kiam li ĵetis sin kontraŭ ĝin; sed kiom longe li kuŝis tie, li ne sciis. Tiam li estis arda, senespera kaj furioza; nun lin tremigis la malvarmo. Li ŝteliris al la pordo kaj premis al ĝi sian orelon.

Forinterne li povis aŭdi mallaŭte la voĉojn de orkoj bruegantaj, sed baldaŭ ili ĉesis aŭ forpasis el aŭdodistanco, kaj ĉio silentiĝis. Lia kapo doloris, kaj liaj okuloj vidis fantomajn lumojn en la malhelo, sed li baraktis por sin ordigi kaj pensi. Estis ĉiuokaze klare, ke mankas espero pri eniro al la orka fortikaĵo tra tiu pordo; li eble atendus tie dum tagoj antaŭ ol ĝi estus malfermita, kaj atendado ne eblis: la tempo estis terure valora. Li jam ne plu dubis pri sia devo: li devos savi sian mastron aŭ perei klopodante.

— La pereo pli probablas, kaj ĉiuokaze estos pli facila, — li diris serioze al si, dum li eningigis Pikilon kaj forturnis sin de la latuna pordo. Li malrapide palpserĉis vojon en la mallumo tra la tunelo, ne riskante uzi la elfan lumon; kaj dumire li provis kunligi la okazaĵojn post kiam Frodo kaj li forlasis la krucvojon. Li scivolis, kioma horo estas. Ie inter unu tago kaj alia, li supozis, sed eĉ pri la tagoj li jam perdis la kalkulon. Li estis en malluma lando, kie la tagoj de la mondo ŝajnis forgesitaj, kaj kie ankaŭ ĉiuj enirintoj estis forgesataj.

— Mi scivolas, ĉu ili entute pensas pri ni, — li diris, — kaj kio okazas al ili ĉiuj tie fore. — Li gestis malprecize per sia mano en la aero; sed li fakte nun frontis suden, revenante al la tunelo de Ŝeloba, ne okcidenten. Fore okcidente en la mondo proksimiĝis la tagmezo de la dek-kvara tago de marto laŭ la Provinca kalkulo, kaj ĝuste nun Aragorno rekondukis el Pelargiro la nigran ŝiparon, kaj Gaja rajdis kun la rohananoj tra la Ŝtonfurgona Valo, dum en Minaso Tirit flamoj leviĝis kaj Grinĉjo vidis la frenezecon plifortiĝi en la okuloj de Denetoro. Tamen inter ĉiuj zorgoj kaj timoj la pensoj de iliaj amikoj konstante direktiĝis al Frodo kaj Sam. Ili ne estis forgesitaj. Sed ili estis fore ekster la helpatingo, kaj neniu penso povis havigi helpon al Samsaĝo, filo de Hamfasto. Li estis tutege sola.

Li revenis finfine al la ŝtona pordo de la orka koridoro, kaj plu ne kapablis trovi la klinkon aŭ riglilon, kiu fermtenis ĝin, li kiel antaŭe

transgrimpis ĝin kaj falis malkrude al la tero. Poste li vojis kaŝeme al la elirejo de la tunelo de Ŝeloba, kie la ĉifonoj de ŝia granda araneaĵo daŭre disbloviĝis kaj ŝanceliĝis en la malvarma aero. Ĉar malvarma ĝi ŝajnis al Sam post la fetora mallumo malantaŭe; sed ties spiro refreŝigis lin. Li ŝteliris singarde eksteren.

Ĉio estis misaŭgure kvieta. La lumo ne pli fortis ol tiu de krepusko je fino de malhela tago. La vastaj vaporoj, kiuj leviĝis en Mordoro kaj fluis okcidenten, pasis malalte super lia kapo, granda konfuzaĵo el nuboj kaj fumo, jam denove prilumata per malvigle ruĝa ardo.

Sam rigardis supren al la orka turego, kaj subite tra ties mallarĝaj fenestroj lumoj gapis eksteren kvazaŭ ruĝaj okuletoj. Li scivolis, ĉu ili estas iaspeca signalo. Lia timo pri la orkoj, provizore forgesita pro lia kolero kaj lia senesperiĝo, nun revenis. Laŭ lia supozo nur unu proceduro eblis al li: pluiri kaj trovi la ĉefpordon de la terura turego, sed liaj genuoj sentiĝis feblaj, kaj li konstatis, ke li tremas. Tirante suben siajn okulojn de la turego kaj la kornoj de la fendaĵo antaŭ li, li obeigis siajn malvolontajn piedojn, kaj malrapide, plenstreĉe aŭskultante, gapante en densajn ombrojn de la apudvojaj rokegoj, li postsekvis siajn paŝojn, preter la loko, kie Frodo falis kaj daŭre la odoraĉo de Ŝeloba postrestis, kaj poste supren plu, ĝis li staris denove en la fendego mem, kie li surmetis la Ringon kaj vidis pasi la trupon de Ŝagrato.

Tie li haltis kaj sidiĝis. Provizore li ne plu povis peli sin antaŭen. Li sentis, ke post kiam li pasos la verton de la pasejo kaj faros unu paŝon vere suben al la lando Mordoro, tiu paŝo estos nerevokebla. Li neniam povus reveni. Sen klara celo li elprenis la Ringon kaj denove surmetis ĝin. Li tuj spertis la ŝarĝegon de ĝia pezo, kaj sentis freŝe, sed jam pli forte kaj urĝe ol iam, la malicon de la Mordora Okulo, serĉanta, klopodanta trapiki la ombrojn, kiujn ĝi kreis sindefende, sed kiuj nun malhelpis ĝin dum ĝia maltrankvilo kaj dubemo.

Kiel antaŭe Sam konstatis, ke lia aŭdkapablo akriĝis, sed laŭ lia vido la ĉi-mondaj aferoj ŝajnis maldensaj kaj malprecizaj. La rokmuroj de la vojo estis palaj, kvazaŭ vidataj tra nebuleto, sed ankoraŭ li aŭdis fore la bobeladon de Ŝeloba en ties mizero; akre, klare kaj tre proksime tio ŝajnis, li aŭdis kriojn kaj interfrapon de metalo. Li saltstariĝis, kaj premis sin al la apudvoja muro. Lin ĝojigis la Ringo, ĉar jen estis alia trupo da orkoj marŝanta. Aŭ tiel li unue supozis. Tiam subite li konstatis, ke ne estas tiel, lia aŭdado trompis lin: la orkaj krioj venis el la turego, kies plej alta korno estis nun rekte super li, maldekstre de la fendego.

Sam horortremis kaj klopodis devigi sin moviĝi. Klare estis iu fimagio. Eble malgraŭ ĉiuj ordonoj la krueleco de la orkoj superregis ilin, kaj ili

turmentas Frodon, aŭ eĉ sovaĝe dishakas lin. Li aŭskultis; kaj al li venis ekbrilo de espero. Ne multe dubeblis: okazas luktado en la turego, la orkoj evidente batalas inter si, Ŝagrato kaj Gorbago venis al interbatiĝo. Malgraŭ malforto de la espero alportita de lia konjekto, ĝi sufiĉis por vigligi lin. Eble troviĝis eta ebleco. Lia amo al Frodo leviĝis super ĉiujn aliajn pensojn, kaj forgesinte sian danĝeron li kriis laŭte:

— Mi venas, sinjoro Frodo!

Li kuris antaŭen ĝis la verto de la suprenira pado kaj transiris ĝin. Tuj la vojo turniĝis maldekstren kaj plonĝis krute suben. Sam jam transiris en Mordoron.

Li demetis la Ringon, motivita eble per iu profunda antaŭvido de danĝero, kvankam interne li pensis nur, ke li deziras vidi pli klare.

— Prefere rigardi la plej malbonan, — li murmuris. — Ne utilas ĉirkaŭstumbli en nebulo!

Malmola kaj kruela kaj amara estis la lando, kiun trafis lia rigardo. Antaŭ liaj piedoj la plejalta firsto de Efelo Duad apike subiris laŭ grandaj klifoj en malluman kavon, aliflanke de kiu leviĝis alia firsto, malpli alta, kies randon noĉis kaj zigzagis rokoj dentaĉsimilaj, kiuj elstaris nigre kontraŭ la ruĝa lumo malantaŭa: tio estis la morna Morgajo, la interna ringo de la bariloj de la lando. Malproksime poste, sed preskaŭ rekte antaŭe, trans larĝa lago da mallumo punktita je etaj fajroj, vidiĝis granda brulardo; kaj de ĝi leviĝis laŭ enormaj kolonoj kirliĝa fumo, bistre ruĝa ĉe la radikoj, supre nigra, kie ĝi mergiĝis kun la ondeganta baldakeno, kiu tegmente kovris la tutan malbenitan landon.

Sam estis rigardanta Orodruinon, la Fajromonton. Ĉiam denove la fornoj malproksimaj sub ĝia cindra konuso ardiĝis kaj kun grandaj ŝveliĝoj kaj pulsadoj elverŝis riverojn da fandita rokaĵo el abismoj en ĝiaj flankoj. Iuj fluis flamante al Baraduro tra enormaj kaneloj; iuj serpentumis sur la ŝtonozan ebenaĵon, ĝis ili malvarmiĝis kaj kuŝis kvazaŭ torditaj drakformoj vomitaj el la turmentita tero. En ĝuste tia naskturmenta horo Sam ekvidis la Monton de Sorto, kaj ties lumo, barita per la alta ekrano de Efelo Duad disde tiuj, kiuj grimpis la vojon el la okcidento, nun ekflagris sur la nudaj rokfacoj, tiel ke ili ŝajnis saturiĝi je sango.

En tiu terura lumo Sam staris konsternite, ĉar nun, rigardante maldekstren, li povis vidi la turegon de Cirito Ungol en ties tuta forto. La korno, kiun li vidis de la alia flanko, estis nur ties plej supra tureto. Ĝia orienta faco baŭmis laŭ tri grandaj ŝtupoj desur breto en la monta muro fore sube; ĝia dorso estis turnita al klifego malantaŭe, de kiu ĝi elstaris je pintaj bastionoj, unu super alia, malgrandiĝantaj dum la supreniro, kun krutaj flankoj el lerta masonaĵo, kiu frontis nord-orienten kaj sud-orienten. Super

la plej malalta ŝtupo, je ducent futoj sub la loko, kie Sam nun staris, troviĝis muro krenela, kiu enfermis mallarĝan korteton. Ties pordo, je la pli proksima sud-orienta flanko, malfermiĝis al larĝa vojo, kies ekstera randmuro laŭiris eĝon de krutegaĵo, ĝis ĝi deviis suden kaj serpentumis suben en la mallumon por aliĝi al la vojo venanta tra la Morgula Pasejo. Poste ĝi daŭris tra segildenta fendo en Morgajo eksteren al la valo de Gorgoroto kaj plu al Baraduro. La mallarĝa supra vojeto, kie staris Sam, saltis rapide suben por renkontiĝi kun la ĉefvojo sub la brovumantaj muroj proksime al la turega pordego.

Rigardante ĝin Sam subite komprenis, preskaŭ ŝokite, ke tiu ĉi fortikaĵo estis konstruita ne por bari eksterajn malamikojn, sed por reteni ilin interne. Ĝi estis efektive laboraĵo de Gondoro antaŭ longege, orienta antaŭposteno de la defendaĵoj de Itilio, kreita kiam post la Lasta Alianco la homoj el Okcidentio gardis la misan landon de Saŭrono, kie ankoraŭ kaŝiĝis liaj kreaĵoj. Sed simile al Narĥosto kaj Karĥosto, la Turegoj de la Dentoj, ankaŭ ĉi tie la vigilado malsukcesis, kaj perfido transdonis la turegon al la Mastro de la Ringofantomoj, kaj jam dum multaj jaroj ĝi estis okupata de misuloj. Post la reveno al Mordoro Saŭrono trovis ĝin utila; ĉar li havis malmultajn servistojn, sed multajn timigitajn sklavojn, kaj daŭre ĝia celo estis kiel pratempe malhelpi eskapon el Mordoro. Tamen se malamikoj aŭdacus provi la sekretan eniron al tiu lando, tiam ĝi estus ankaŭ lasta sendorma gardo kontraŭ iuj, kiuj eble preterpasus la vigiladon de Morgulo kaj Ŝeloba.

Tro klare Sam vidis kiel senespere estus, se li kaŝe descendus sub tiuj multokulaj muroj por pasi la gardatan pordon. Kaj eĉ se li farus tion, li ne povus longe iri laŭ la gardata vojo; eĉ la nigraj ombroj, profunde kuŝantaj ekster atingo de la ruĝa ardo, ne longe ŝirmus lin de la noktokulaj orkoj. Sed kvankam tiu vojo estus senespera, lia tasko jam pli malbonis: ne eviti kaj eskapi la pordon, sed eniri tra ĝi, senakompane.

Lia penso turniĝis al la Ringo, sed tie konsolo mankis, ĉeestis nur timego kaj danĝero. Tuj post kiam li ekvidis en la foro la brulantan Monton de Sorto, li konstatis ŝanĝiĝon en sia ŝarĝo. Dum ĝi proksimiĝis al la fornegoj, kie en la fundoj de la tempo ĝi estis formita kaj forĝita, la potenco de la Ringo kreskis, kaj ĝi fariĝis pli danĝera, neregebla krom per iu fortega volo. Dum Sam staris tie, kvankam la Ringon li ne havis surfingre, kaj ĝi pendis sur sia ĉeno ĉirkaŭ lia kolo, li sentis sin pligrandigita, kvazaŭ li estus vestita en enorma distordita ombro de si mem, vasta kaj misaŭgura minaco haltigita sur la muroj de Mordoro. Li sentis, ke de tiam li havas nur du elekteblojn: rifuzi la Ringon, kvankam ĝi turmentus lin; aŭ pretendi ĝin kaj defii la Potencon sidantan en ĝia malhela fortikaĵo post la valo de ombroj. Jam la Ringo tentis lin, mordante liajn volon kaj racion. Nekredeblaj

fantaziaĵoj leviĝis en lia menso; kaj li vidis Samsaĝon la Fortan, Heroon de la Epoko, paŝeganta kun flamanta glavo tra la sombriĝa lando, kaj armeojn entuziasme kuniĝantaj laŭ lia alvoko, kiam li marŝis por renversi Baraduron. Kaj poste ĉiuj nuboj forruliĝis, kaj blanka suno leviĝis, kaj pro lia ordono la valo de Gorgoroto estiĝis ĝardeno de floroj kaj arboj kaj naskis fruktojn. Necesis nur ke li surfingrigu la Ringon kaj pretendu ĝin por si, kaj ĉi ĉio povus okazi.

En tiu horo tenta, ĝuste la amo al la mastro plej helpis lin plu esti firma; sed ankaŭ en lia fundo vivis ankoraŭ nevenkite lia ordinara hobita sagaco: li sciis en la kora kerno, ke li ne sufiĉe grandas por toleri tian ŝarĝon, eĉ se tiaj vizioj ne estus nura trompo por perfidi lin. Unu ĝardeneto de libera ĝardenisto estis lia tuta bezono kaj rajto, ne ĝardeno ŝvelinta al regno; la propraj manoj uzotaj, ne la manoj de aliuloj ordonotaj.

— Kaj ĉiuokaze nur truko estas ĉi tiuj ideoj, — li diris al si. — Li ekvidos min kaj senkuraĝigos min, antaŭ ol mi povos eĉ ekkrii. Li ekvidos min sufiĉe rapide, se mi surmetos la Ringon nun, en Mordoro. Nu, jen mia tuta konkludo: la aferoj ŝajnas tiel senesperaj kiel frosto en printempo. Ĝuste kiam nevidebleco estus vere utila, la Ringon mi ne povas uzi! Kaj se mi iam sukcesos pluiri, ĝi estos nenio alia ol trenaĵo kaj ŝarĝo ĉiupaŝe. Do, kion mi faru?

Li ne vere dubis. Li sciis, ke li devos subeniri al la pordego kaj ne plu prokrasti. Skuinte la ŝultrojn, kvazaŭ por forskui la ombron kaj forigi la fantomojn, li komencis malrapide subiri. Je ĉiu paŝo li ŝajnis plietiĝi. Li ne multe progresis ĝis li jam reŝrumpis al tre malgranda kaj timigita hobito. Li nun preterpasis sub la muroj mem de la turego, kaj la krioj kaj sonoj de batalado estis aŭdeblaj al liaj senhelpaj oreloj. Ĉi-momente la bruo ŝajnis veni el la korto malantaŭ la ekstera muro.

Sam estis proksimume duonvoje laŭ la pado, kiam el la malhela enirejo en la ruĝan ardon enkuris du orkoj. Ili ne turniĝis liadirekten. Ili celis la ĉefvojon; sed dum la kurado ili stumblis kaj falis teren kaj kuŝis senmove. Sam vidis neniujn sagojn, sed li supozis, ke la orkoj estas pafitaj de aliaj sur la remparo aŭ kaŝitaj en la ombro de la pordego. Li pluiris, premiĝante al la muro maldekstre. Unu suprenrigardo konvinkis lin, ke ne eblas ĝin grimpi. La masonaĵo leviĝis tridek futojn, sen fendeto aŭ breto, al superpendaj tavoloj similaj al renversitaj ŝtupoj. La pordo estis la sola vojo.

Li ŝteliris pluen; kaj dumire li scivolis, kiom da orkoj loĝas en la turego kun Ŝagrato, kaj kiom havas Gorbago, kaj pri kio ili kverelas, se tia estas la afero. La trupo de Ŝagrato pli frue ŝajnis ĉirkaŭ kvardeko, kaj tiu de Gorbago pli ol duoble tioma; sed kompreneble la patrolo de Ŝagrato estis nur parto de lia garnizono. Preskaŭ certe ili kverelis pri Frodo kaj la rabaĵo.

Momente Sam haltis, ĉar subite la aferoj ŝajnis al li klaraj, preskaŭ kvazaŭ li vidus ilin propraokule. La kiraso mitrila! Kompreneble Frodo ĝin portas, kaj certe ili trovis ĝin. Kaj laŭ tio, kion Sam aŭdis, Gorbago certe avidas ĝin. Sed la ordonoj el la Malhela Turego estis tiutempe la sola protektaĵo de Frodo, kaj se oni ignorus ilin, Frodo povus esti iam ajn mortigita.

— Ek al, mizera pigrulo! — Sam kriis al si. — Nun tempas agi!

Li elingigis Pikilon kaj kuris al la malfermita pordo. Sed ĝuste kiam li estis enironta sub la arkaĵegon li spertis ŝokon: li kvazaŭ karambolus kun ia araneaĵo simila al tiu de Ŝeloba, sed nevidebla. Neniun obstaklon li povis vidi, sed io tro fortika kontraŭ plenumo de lia volo baris al li la vojon. Li ĉirkaŭrigardis, kaj tiam en la ombro de la pordego li vidis la Du Gardantojn.

Ili similis figuregojn sidantaj sur tronoj. Ĉiu el ili havis po tri ligitaj korpoj, kaj po tri kapoj frontantaj eksteren, internen kaj trans la enirejon. La kapoj havis vizaĝojn vulturajn, kaj sur iliaj genuegoj kuŝis krifsimilaj manoj. Ili ŝajnis ĉizitaj el grandaj ŝtonblokoj, nemoveblaj, kaj tamen ili konsciis: iu terura spirito de fia vigileco loĝis en ili. Ili rekonas malamikojn. Ĉu videbla, ĉu nevidebla, neniu povis preteri nerimarkite. Ili malpermesus lian eniron aŭ eskapon.

Hardante sian volon Sam denove puŝis sin antaŭen kaj haltis abrupte, ŝanceliĝante kvazaŭ pro bato al liaj brusto kaj kapo. Poste, multe riskante, ĉar nenion alian fareblan li povis elpensi, responde al subita penso veninta al li, li malrapide eligis la flakoneton de Galadriela kaj alte tenis ĝin. Ĝia blanka lumo rapide viviĝis, kaj la ombroj sub la malhela arkaĵo fuĝis. La monstraj Gardantoj sidis tie fridaj kaj senmovaj, rivelitaj laŭ sia tuta hida formo. Momente Sam ekvidis brileton en la nigraj ŝtonoj de iliaj okuloj, kies malico mem timigis lin; sed malrapide li sentis ilian volon ŝanceliĝi kaj diseriĝi en timon.

Li pretersaltis ilin; sed ĝuste dum li faris tion, reŝovante la flakoneton en sian sinon, li konsciis klare, kvazaŭ ŝtala stango klakfermiĝus malantaŭ li, ke ilia vigileco renoviĝis. Kaj el tiuj fiaj kapoj eliĝis alta akra krio, kiu eĥis en la baŭmaj muroj antaŭ li. Forsupre, kvazaŭ responda signalo, raŭka sonorilo sonigis unuopan baton.

— Jen farite! — diris Sam. — Mi sonorigis ĉe la dompordo! Nu, venu jam, iu ajn! Diru al komandanto Ŝagrato, ke la granda elfa batalisto vizitas, ankaŭ kun sia elfa glavo!

Aŭdiĝis neniu respondo. Sam paŝis antaŭen. Pikilo briletis blue en lia mano. La korto kuŝis en profunda ombro, sed li vidis, ke sur la pavimo estis dissternitaj multaj kadavroj. Ĝuste antaŭ liaj piedoj estis du orkaj arkpafistoj kun ponardoj en la dorsoj. Poste kuŝis multaj aliaj: iuj unuope, morthakitaj aŭ pafitaj; aliaj duope, ankoraŭ kroĉantaj unu la alian, mortigitaj dum la

pika lukto mem, strangolantaj, mordantaj. La ŝtonoj estis glitige kovritaj de malhela sango.

Sam rimarkis du livreojn, unu signitan je la Ruĝa Okulo, la alian je luno misformita laŭ hidega vizaĝo de la morto, sed li ne haltis por rigardi de pli proksime. Trans la korto, pordego sube de l' turego estis duone malfermita, kaj trairis ruĝa lumo: granda orko kuŝis morta sur la sojlo. Sam transsaltis la kadavron kaj eniris; kaj poste li ĉirkaŭgapis ne sciante kion fari.

Larĝa kaj eĥanta koridoro direktiĝis malantaŭen de la pordo al la montoflanko. Ĝin malhele lumigis torĉoj flagrantaj en krampoj sur la muroj, sed ĝia fora ekstremo perdiĝis en sombro. Multaj pordoj kaj trairejoj estis videblaj ambaŭflanke sporadaj; sed ĝi estis malplena escepte de du-tri pliaj kadavroj dissternitaj sur la planko. Pro tio, kion li aŭdis en la parolo inter la du trupestroj, Sam sciis, ke la morta aŭ viva Frodo plej verŝajne troviĝas en ĉambro alte en la turo tre supre; sed li eble devus serĉi dum tuta tago antaŭ ol trovi la vojon.

— Ĝi proksimas la malantaŭon, laŭ mia konjekto, — murmuris Sam. — La tuta turego supreniras kvazaŭ malantaŭen. Kaj ĉiuokaze mi prefere sekvu jenajn lumojn.

Li antaŭeniris laŭ la koridoro, sed jam malrapide, ĉiupaŝe malpli volonte. Teruro komencis denove kroĉi lin. Aŭdiĝis neniu sono krom la batado de liaj piedoj, kiu ŝajnis kreski al eĥanta bruo, kiel la frapado de manegoj sur la ŝtonoj. La kadavroj, la malpleno, la humidaj nigraj muroj kiuj en la torĉa lumo ŝajnis guti sangon, la timo pri subita morto embuskanta en iu pordejo aŭ ombro; kaj malantaŭ lia tuta menso la atendata gvata malicaĵo ĉe la pordego: ĉio ĉi estis preskaŭ pli ol li povis devigi sin fronti. Lukto estis al li pli bonvena — kontraŭ ne tro multaj malamikoj samtempe — ol tiu ĉi hida kovanta necerteco. Li devigis sin pensi pri Frodo kuŝanta ligite aŭ dolorante aŭ mortinte ie en tiu timiga loko. Li pluiris.

Li jam pasis ekster la torĉlumon, preskaŭ ĝis granda arkaĵa pordo fine de la koridoro, la interna flanko de la suba pordo, laŭ lia prava konjekto, kiam aŭdiĝis de supre tre alte terura sufokiĝa kriĉo. Li haltis abrupte. Poste li aŭdis proksimiĝantajn piedojn. Iu kuris hastege malsupren laŭ eĥanta ŝtuparo super lia kapo.

Lia volo tro malfortis kaj malrapidis por malhelpi lian manon. Ĝi tiris la ĉeneton kaj kaptis la Ringon. Sed Sam ankoraŭ ne surfingrigis ĝin; ĉar ĝuste kiam li premis ĝin al sia brusto, venis suben klakanta orko. Elsaltinte tra senluma trairejo dekstre, li alkuris. Li estis for ne pli ol ses paŝojn, kiam, levante sian kapon, li ekvidis Samon; kaj Sam povis aŭdi lian anhelan spiradon kaj vidi la furiozon en liaj sangostriaj okuloj. Konsternite li haltis abrupte. Ĉar tio, kion li vidis, ne estis eta timigita hobito provanta teni firme

la glavon: li vidis grandan silentan figuron, mantelitan per griza ombro, baŭmantan antaŭ la ŝanceliĝaj malantaŭaj lumoj; per unu mano ĝi tenis glavon kies lumo mem estis forte doloriga, per la alia ĝi krocis sian bruston, sed tenis kaŝite iun sennoman minacon de potenco kaj destino.

Momente la orko kaŭris, kaj poste kun hida timojelpo li turniĝis kaj refuĝis tien, de kie li venis. Neniam estis iu hundo pli kuraĝigita, kiam ĝia malamiko forkuris, ol Sam pro tiu neatendita fuĝo. Kun krio li postkuris.

— Jes! La elfa batalisto estas libera! — Li kriis.— Mi venas. Nur montru al mi la vojon supren, aŭ mi senhaŭtigos vin!

Sed la orko estis sur propra tereno, vigla kaj bone nutrita. Sam estis fremdulo, malsata kaj lacega. La ŝtuparo estis alta kaj kruta kaj serpentuma. La spiro de Sam komencis anheliĝi. La orko baldaŭ malaperis, kaj nun nur feble aŭdiĝis la frapado de liaj piedoj, dum li pluiris supren. De tempo al tempo li eligis krion, kaj ties eĥo trakuris la murojn. Sed iom post iom ties tuta bruo formortis.

Sam plandis plu. Li sentis, ke li estas sur la ĝusta vojo, kaj lia animstato jam sufiĉe fortiĝis. Li forŝovis la Ringon kaj striktigis sian zonon.

— Nu, nu! — li diris. — Se ĉiuj simile malŝatos min kaj mian Pikilon, tio ĉi eble finiĝos pli bone ol mi esperis. Kaj ĉiuokaze ŝajnas, ke Ŝagrato, Gorbago kaj kompanio preskaŭ elfaris mian taskon. Krom tiu timigita rateto, neniu restas vivanta en tiu ĉi loko mi ja kredas!

Kaj tion dirinte li haltis, abrupte bremsita, kvazaŭ li frapus sian kapon kontraŭ la ŝtonan muron. La plena signifo de tio, kion li diris, trafis lin kvazaŭ bato. Neniu restas vivanta! Kies estis tiu terura sufokiĝa kriĉo?

— Frodo, Frodo! Mastro! — li kriis duonsingulte. — Se ili jam mortigis vin, kion mi faru? Nu, mi venas finfine, al la supraĵo mem, por vidi ĉion videndan.

Li daŭre supreniris. Estis senlume, escepte de okazaj torĉoj flagrantaj ĉe vojturniĝoj aŭ apud iuj trairejoj, kiuj kondukis en la pli altajn etaĝojn de la turego. Sam provis kalkuli la ŝtupojn, sed post ducento li perdis orientiĝon. Li nun movis sin kviete; ĉar ŝajnis al li, ke li aŭdas voĉojn parolantajn ankoraŭ iom supre. Pli ol unu rato restis viva, ŝajne.

Tute subite, kiam li jam supozis neebla pluan elpumpon de spiro aŭ kurbigon de la genuoj, la ŝtuparo finiĝis. Li staris senmova. La voĉoj estis nun laŭtaj kaj proksimaj. Sam ĉirkaŭrigardis. Li ja grimpis ĝis la plata tegmento de la tria kaj plej alta ŝtupo de la turego: malfermita spaco, larĝa je ĉirkaŭ dudek paŝoj, kun malalta parapeto. Tie la ŝtuparon kovris eta kupolita ĉambro en la mezo de la tegmento, kun malalta pordo frontanta orienten kaj okcidenten. Oriente Sam povis vidi la ebenaĵon de Mordoro vasta kaj malhela sube, kaj la brulantajn montojn en la foro. Freŝa

perturbego ŝvelis en ĝiaj profundaj putoj, kaj la fajroriveroj flamis tiel feroce, ke eĉ je tia multmejla distanco lumo heligis la tursupron per ruĝa ardo. Okcidente la vidon baris la bazo de l' granda turo, kiu staris ĉe la malantaŭo de tiu ĉi supera korto kaj altigis sian kornon super la kreston de la ĉirkaŭantaj montetoj. Lumo ekbrilis en mallarĝa fenestro. Ĝia pordo staris apenaŭ dek paŝojn de kie troviĝis Sam. Ĝi estis malfermita sed senluma, kaj tuj el ĝia ombro venis la voĉoj.

Komence Sam ne aŭskultis; li faris unu paŝon tra la orienta pordo kaj ĉirkaŭrigardis. Li tuj vidis, ke ĉi tie supre la luktado estis plej feroca. La tuta korto estis ŝtopita de mortaj orkoj, de ties forhakitaj kapoj kaj membroj. Tiu loko fetoris je morto. Kolera murmurego sekvata de bato kaj krio igis lin retrosalti en kaŝejon. Leviĝis kolere voĉo orka, kaj li tuj rekonis ĝin, raŭkan, brutan, fridan. Parolis Ŝagrato, la komandanto de la turego.

— Vi ne iros denove, ĉu vi diras? Estu malbenita, Snago, aĉa vermeto! Se vi supozas min tiel vundita, ke vi povas sendanĝere malobei min, vi eraras. Venu ĉi tien, kaj mi elpremos viajn okulojn, kiel mi faris al Radbugo ĝuste nun. Kaj kiam venos novuloj, mi pritraktos vin: mi sendos vin al Ŝeloba.

— Tiuj ne venos, almenaŭ ne antaŭ via morto, — respondis Snago malafable. — Mi jam dufoje diris al vi, ke la porkoj de Gorbago atingis la pordegon la unuaj, kaj neniu el la niaj sukcesis eliri. Lagdufo kaj Muzgaŝo trakuris, sed ili estas pafitaj. Mi tion vidis tra fenestro, mi diras al vi. Kaj ili estis la lastaj.

— Do devos iri vi. Ĉiuokaze mi devas resti ĉi tie. Sed mi estas vundita. La Nigraj ŝaktoj prenu tiun fian ribelinton Gorbagon! — La voĉo de Ŝagrato deviis al listo de finomoj kaj sakroj. — Mi donis al li pli ol mi ricevis, sed li ponardis min, tiu fekulo, antaŭ ol mi sufokis lin. Vi devas iri, aŭ mi voros vin. Informo devas atingi Lugburzon, aŭ ni ambaŭ trafos en la Nigrajn ŝaktojn. Jes, ankaŭ vi. Vi ne eskapos per kaŝiĝo ĉi tie.

— Mi ne descendos denove tiujn ŝtuparojn, — graŭlis Snago, — ĉu vi estas estro aŭ ne. Ne! For la manoj de via tranĉilo, aŭ mi sendos sagon en vian ventraĉon. Vi ne longe restos estro, post kiam oni aŭdos pri tiuj okazaĵoj. Mi batalis por la turego kontraŭ tiuj fetoraj morgulratoj, sed belan fatrason faris vi, du estroj, kverelante pri la rabaĵo.

— Jam sufiĉe de vi, — mordminacis Ŝagrato. — Al mi estis ordonite. Komencis tion ĝuste Gorbago, provante ŝtelaĉi tiun beletan ĉemizon.

— Nu, vi kuspis lin, estante tiel arogante ordonema; Kaj li ĉiuokaze havis pli da sagaco ol vi. Li sciigis vin pli ol unufoje, ke la plej danĝera el tiuj spionoj daŭre liberas, sed vi ne volis aŭskulti. Kaj ankaŭ nun vi ne volas aŭskulti. Gorbago pravis, mi diras al vi. Apudas granda batalisto, unu el tiuj

sangmanaj elfoj, aŭ unu el la fiaj *tarkoj*[11]. Li venas ĉi tien, mi diras al vi. Vi aŭdis la sonorilon. Li preterpasis la Gardistojn, kaj tio estas plenumo *tarka*. Li troviĝas sur la ŝtuparo. Kaj ĝis li forlasos ĝin, mi ne iros suben. Eĉ se vi estus nazgulo, mi ne konsentus.

— Do, jen la afero, ĉu? — kriis Ŝagrato.— Vi tion faros, aŭ vi tion ne faros, ĉu? Kaj kiam li ja venos, vi fuĝos kaj forlasos min, ĉu? Ne, vi tion ne faros! Pli frue mi aperigos ruĝajn vermtruojn en via ventro.

Tra la tura pordo la pli malgranda orko venis fuĝante. Malantaŭ li venis Ŝagrato, orko pli granda kun la longaj brakoj, kiuj, dum li kuris kaŭre, atingis la teron. Sed unu brako pendis malrigida kaj ŝajnis esti sanganta; la alia kroĉis nigran pakaĵegon. En la arda ruĝo Sam, kaŭranta malantaŭ la ŝtupara pordo, ekvidis fivizaĝon pasantan: ĝi estis striita kvazaŭ per ŝiraj krifoj kaj sangoŝmirita; bavo gutis de ĝiaj elstaraj dentegoj; la buŝo mordminacis bestece.

Kiom povis vidi Sam, Ŝagrato persekutis Snagon ĉirkaŭ la tegmenton, ĝis kaŭrante kaj evitante lin la pli malgranda orko kun jelpo rekuris en la tureton kaj malaperis. Tiam Ŝagrato haltis. Tra la orienta pordo Sam povis vidi lin apud la parapeto, anhelantan dum lia maldekstra krifaro feble kroĉiĝis kaj malkroĉiĝis. Li surterigis la pakaĵegon kaj per la dekstra krifaro eltiris longan ruĝan ponardon kaj kraĉis sur ĝin. Irinte al la parapeto li kliniĝis transen, rigardante suben al la ekstera korto fore. Dufoje li kriis, sed neniu respondo aŭdiĝis.

Subite, dum Ŝagrato kliniĝis sur la parapeto dorse al la tegmentosupro, Sam vidis mirigite, ke unu el la diskuŝaj kadavroj moviĝas. Li rampis. Li etendis krifaron kaj kaptis la pakaĵon. Li ŝanceliĝe stariĝis. En la alia mano li tenis larĝklingan lancon kun mallonga rompita tenilo. Li pretis por pika puŝo. Sed ĝuste tiumomente siblo eskapis tra liaj dentoj, eksplodo dolora aŭ malama. Serpente rapide Ŝagrato glitis flanken, tordiĝe turnis sin, kaj per sia ponardo trapikis la gorĝon de sia malamiko.

— Jen al vi, Gorbago! — li kriis. — Ĉu ne tute mortinta? Nu, mi jam kompletigos mian taskon. — Li saltis al la falinta korpo, kaj furioze piedfrapis kaj stamfis ĝin, kliniĝante de tempo al tempo por piki kaj tranĉi ĝin per sia ponardo. Fine kontentigite, li ĵetis malantaŭen sian kapon kaj eligis hidan gargaran krion de triumfo. Poste li lekis sian tranĉilon, kaj metis ĝin inter la dentojn, kaj enmaniginte la pakaĵon li salte kuris al la pli proksima pordo de la ŝtuparejo.

Al Sam mankis tempo por pripensado. Li eble povis elgliti tra la alia pordo, sed apenaŭ nevidate; kaj li ne longe povus kaŝludi kun tiu hida orko. Li faris tion, kio probable estis la plej prudenta faro. Kriante li elsaltis renkonte al Ŝagrato. Li jam ne tenis la Ringon, sed ĝi estis tie, potenco

kaŝita, kaŭra minaco al la sklavoj de Mordoro; kaj en lia mano estis Pikilo, kaj ties lumo trafis la okulojn de l' orko kvazaŭ ekbrilo de kruelaj steloj en la teruraj elflandoj, sonĝo pri kiu signifis malvarman timon al ĉiuj liarasanoj. Kaj Ŝagrato ne povis samtempe lukti kaj tenadi sian trezoron. Li haltis, graŭlante, nudigante siajn dentegojn. Tiam ankoraŭfoje, orkmaniere, li saltis flanken, kaj kiam Sam alsaltis li utiligis la pakaĵegon samtempe kiel ŝildon kaj armilon kaj puŝis ĝin al la vizaĝo de sia kontraŭulo. Sam ŝanceliĝis, kaj antaŭ ol li povis ekvilibriĝi, Ŝagrato preterpafiĝis kaj malsupreniris la ŝtuparon.

Sam postkuris lin sakrante, sed li ne iris tre longe. Baldaŭ la penso pri Frodo revenis al li, kaj li memoris, ke la alia orko reiris en la tureton. Jen alia terura elekto, kaj mankis al li tempo por pripensi ĝin. Se Ŝagrato eskapus, li baldaŭ trovus helpon kaj revenus. Sed se Sam persekutus lin, la alia orko eble plenumus iun hidan faron tie supre. Kaj ĉiuokaze Sam eble maltrafus Ŝagraton aŭ estus mortigita de li. Li turnis sin rapide kaj rekuris supren.

— Denove malprave, mi supozas, — li suspiris. — Sed mia tasko estas unue supreniri al la altejo, kio ajn okazos poste.

Forsube Ŝagrato iris saltante tra la ŝtuparo kaj eksteren sur la korton kaj tra la pordego, kroĉante sian valoran ŝarĝon. Se Sam povus vidi lin kaj scius la doloron, alportotan de lia eskapo, li eble senkuraĝiĝus. Sed nun lia menso estis komplete direktita al la lasta etapo de la serĉo. Li venis singarde al la tura pordo kaj trapaŝis. Ĝi malfermiĝis al mallumo. Sed baldaŭ liaj gapaj okuloj konstatis malhelan lumeton dekstre. Tiu venis tra malfermaĵo, kiu kondukis al alia ŝtuparo, senluma kaj mallarĝa: ĝi ŝajne iris serpentume supren en la tureto laŭ la interno de ties ronda ekstera muro. Ekbriletis torĉo de ie supre.

Mallaŭte Sam komencis grimpi. Li venis al la ekbraĝa torĉo, fiksita super pordo maldekstre frontanta al fenestra fendeto, kiu elrigardis okcidenten: unu el la ruĝaj okuloj, kiujn li kaj Frodo vidis desube apud la elirejo de l' tunelo. Rapide Sam pasis la pordon kaj hastis al la dua etaĝo, ĉiumomente timante esti atakata kaj senti sufokajn fingrojn kapti lian gorĝon de malantaŭe. Li venis poste al fenestro frontanta orienten kaj alia torĉo super la pordo al koridoro tra la mezo de la tureto. La pordo estis aperta, la koridoro mallumis escepte de la ekbrilo de la torĉo kaj la ruĝa ardo de ekstere filtriĝanta tra la fenestra fendeto. Sed tie la ŝtuparo ĉesis kaj ne plu supreniris. Sam ŝteliris en la koridoron. Ambaŭflanke troviĝis po malalta pordo; ambaŭ estis fermitaj kaj ŝlositaj. Neniu sono entute aŭdiĝis.

— Sakvojo, — murmuris Sam, — kaj tio post mia longa grimpado! Tio ĉi ne povas esti la supro de la turo. Sed nun kion mi povos fari?

Li reiris al la pli malalta etaĝo kaj provis la pordon. Ĝi rifuzis moviĝi. Li denove suprenkuris, kaj ŝvito komencis flueti sur lia vizaĝo. Li sentis, ke ĉiu minuto valoras, sed unu post alia ili forpasis; kaj li povis fari nenion. Li ne plu zorgis pri Ŝagrato aŭ Snago aŭ iu ajn alia orko iam naskita. Li sopiris nur sian mastron, unu ekvidon de ties vizaĝo aŭ unu tuŝon de ties mano.

Finfine, lacega kaj sentanta sin fine venkita, li sidiĝis sur ŝtupo sub la nivelo de la koridora planko kaj klinis sian kapon sur siajn manojn. Estis kviete, hide kviete. La torĉo, kiu jam ĉe lia alveno brulis malalte, sputetis kaj estingiĝis; kaj li sentis la mallumon kovri lin tajdece. Kaj tiam mallaŭte, je sia propra surprizo, tie en la vana fino de lia longa vojaĝo kaj lia malĝojo, motivite de nekonebla penso en la koro, Sam komencis kanti.

Lia voĉo sonis maldensa kaj tremeta en la malvarma senluma turo: la voĉo de hobito forlasita kaj laca, kiun neniu aŭskultanta orko povus iel ajn erare supozi klara kanto de elfa princo. Li murmuris malnovajn infanecajn melodiojn el la Provinco kaj fragmentojn de l' rimaĵoj de sinjoro Bilbo, kiuj venis al lia menso kvazaŭ pasemaj ekvidoj de la lando de lia hejmo. Kaj subite leviĝis en li nova forto, kaj lia voĉo sonoris, dum vortoj propraj venis nevokite, konvenaj al la simpla melodio.

En okcident' la suno vojas
printempe, floroj plantas,
burĝonas arboj, akvoj rojas,
la gajaj fringoj kantas.
Aŭ eble noktas klarĉiele,
kaj portas fagoj franĝaj
la elfajn stelojn blankjuvele
inter la haroj brancaj.

Kvankam mi venis al vojfino,
al nigra entombigo
malantaŭ tura fortkulmino,
malantaŭ mont-apiko,
la suno super ombroj riĉas
kaj steloj ĉiam laŭas:
ne diras mi, ke l' tag' finiĝas,
nek stelojn adiaŭas.

— Post ĉiuj turoj fortaj, altaj, — li rekomencis, kaj poste li abrupte silentiĝis. Li pensis, ke li aŭdis respondi al li mallaŭtegan voĉon. Sed nun li povis aŭdi nenion. Jes, li aŭdis ion, sed ne voĉon. Paŝoj proksimiĝis. Nun pordo estis kviete malfermata en la koridoro supre; la ĉarniroj grincis. Sam kaŭris aŭskultante. La pordo fermiĝis kun obtuza bato; kaj poste kriiĝis

mordminaca orkvoĉo.

— Ho la! Vi tie supre, sterkeja rato! Ĉesigu la pepadon aŭ mi venos pritrakti vin. Ĉu vi aŭdas?

Neniu respondis.

— Bone, — graŭlis Snago. — Sed mi ĉiuokaze venos rigardi vin kaj konstatos pri kio vi okupiĝas.

La ĉarniroj denove grincis, kaj Sam, nun gvatante trans angulon de la koridora sojlo, vidis lumflagron en aperta pordejo, kaj la malklaran figuron de venanta orko. Li ŝajnis porti eskalon. Subite la klarigo aŭroris en Sam: la plej supra ĉambro estis alirebla tra klappordo en la koridora tegmento. Snago ŝovis la eskalon supren, stabiligis ĝin, kaj poste grimpis ekster vidatingon. Sam aŭdis la retiron de riglilo. Poste li aŭdis la hidan voĉon denove:

— Kuŝu kviete vi, aŭ vi pagos tion! Vi ne disponas longan tempon por vivi trankvile, mi konjektas; sed se vi ne volas, ke la amuziĝo komenciĝu jam nun, tenu fermita la faŭkon, komprenite? Jen memorigilo al vi! — Aŭdiĝis sono simila al vipkrako.

Je tio kolerego ekflamis en la koro de Sam furioziĝe. Li saltstariĝis, kuris kaj grimpis katece la eskalon. Lia kapo eliĝis meze de la planko de granda ronda ĉambro. Ruĝa lanterno pendis de la plafono; la okcidenta fenestrofendeto estis alta kaj senluma. Io kuŝis sur la planko apud la muro sub la fenestro, sed super ĝi diskruris nigra orkfiguro. Tiu duafoje levis vipon, sed la bato neniam falis.

Kun krio Sam saltis trans la plankon kun Pikilo en la mano. La orko ĉirkaŭturniĝis, sed antaŭ ol li povis manovri Sam fortranĉis la vipmanon de lia brako. Hurlante pro doloro kaj timo la furioza orko impetis kapantaŭe kontraŭ lin. La posta bato de Sam larĝe maltrafis, kaj malekvilibre li falis malantaŭen, kroĉante la orkon dum tiu stumblis transe. Antaŭ ol li povis stariĝi, li aŭdis krion kaj falbaton. La orko en sovaĝa hasto karambolis kun la eskala supro kaj trafalis la apertan klappordon. Sam ne plu pensis pri li kaj kuris al la figuro kuntirita sur la planko. Tiu estis Frodo.

Li estis nuda, kuŝanta kvazaŭ sveninte sur amaso da malpuraj ĉifonoj: lia brako estis ŝovita supren, gardante la kapon, kaj sur lia flanko etendiĝis malbela vipcikatro.

— Frodo! Sinjoro Frodo, mia kara! — kriis Sam, dum larmoj preskaŭ blindigis lin. — Jen Sam, mi venis! — Li duonlevis sian mastron kaj premis lin al sia brusto. Frodo malfermis la okulojn.

— Ĉu mi plu sonĝas? — li murmuris. — Sed la aliaj sonĝoj estis hororaj.

— Vi tute ne sonĝas, mastro, — diris Sam. — Estas reale. Estas mi. Mi

venis.

— Mi apenaŭ povas kredi, — diris Frodo, kroĉante lin. — Troviĝis orko kun vipo, kaj poste ĝi fariĝas Sam! Do mi fakte ne sonĝis, kiam mi aŭdis tiun kantadon sube, kaj mi provis respondi? Ĉu tiu estis vi?

— Vere jes, sinjoro Frodo. Mi preskaŭ rezignis pri espero. Mi ne povis trovi vin.

— Nu, vi jam trovis, Sam, kara Sam, — diris Frodo, kaj li kliniĝis en la mildaj brakoj de Sam, fermante siajn okulojn, kiel infano ripozanta kiam noktaj timoj estas forpelitaj de iu amata voĉo aŭ mano.

Sam sentis, ke li povus sidi tiel en feliĉo senfina; sed ne estis permesate. Ne sufiĉis trovi la mastron, li devis ankoraŭ provi lin savi. Li kisis la frunton de Frodo.

— Ek! Vekiĝu, sinjoro Frodo! — li diris, klopodante soni tiel gaja, kiel li estis, kiam li malfermis la kurtenojn ĉe Bag-Endo en somera mateno.

Frodo suspiris kaj rektigis sin.

— Kie ni estas? Kiel mi venis ĉi tien?

— Ne restas tempo por rakontoj, ĝis ni estos aliloke, sinjoro Frodo, — diris Sam. — Sed ni estas en la supro de tiu turego, kiun vidis vi kaj mi defore apud la tunelo, antaŭ ol la orkoj kaptis vin. Antaŭ kiom da tempo estis tio, mi ne scias. Pli ol tago, mi supozas.

— Ĉu nur tiom? — diris Frodo. — Tio ŝajnas semajnoj. Vi devos rakonti al mi la tuton, se ni havos eblecon. Io frapis min, ĉu ne? Kaj mi falis en mallumon kaj fiajn sonĝojn, kaj vekiĝis kaj trovis, ke vekiĝo pli malbonas. Orkoj ĉirkaŭis min ĉie. Mi opinias, ke ili ĵus ĉesis verŝi iun aĉan bruligan trinkaĵon tra mia gorĝo. Mia kapo klariĝis, sed mi doloris kaj lacis. Ili senigis min je ĉio; kaj poste venis du brutegoj kaj pridemandis min, pridemandis min ĝis mi pensis freneziĝi, starante super mi, ĝojaĉante, fingrumante siajn tranĉilojn. Mi neniam forgesos tiujn krifarojn kaj okulojn.

— Vi ne forgesos, se vi priparolos ilin, sinjoro Frodo, — diris Sam.

— Kaj se vi ne volas revidi ilin, ju pli baldaŭ ni ekiros des pli bone. Ĉu vi kapablas marŝi?

— Jes, mi kapablas marŝi, — diris Frodo, malrapide stariĝante. — Mi ne estas vundita, Sam. Nur mi sentas min tre laca, kaj doloras ĉi tie.

— Li metis sian manon al la kolo super la maldekstra ŝultro. Li stariĝis, kaj al Sam ŝajnis kvazaŭ li estus vestita en flamo: lia nuda haŭto skarlatis pro la lumo de la lanterno supre. Dufoje li trapasis la plankon.

— Jam pli bone! — li diris, kun iomete leviĝanta animstato. — Mi ne aŭdacis moviĝi, kiam oni lasis min sola, aŭ venis unu el la gardantoj. Ĝis komenciĝis la kriado kaj batalado. La du brutegoj: ili kverelis, ŝajnas al mi. Pri mi kaj miaj posedaĵoj. Mi kuŝis ĉi tie terurite. Kaj poste ĉio morte

silentiĝis, kaj tio estis eĉ pli malbona.

— Jes, ili kverelis, verŝajne, — diris Sam. — Certe estis du centoj da kreitaĉoj en tiu loko. Iom tro multe por Sam Vato, kiel oni povus diri. Sed ili plenumis mem la tutan mortigadon. Tio estas feliĉa, sed ĝi tro longas por prikantado, ĝis ni estos for de tie ĉi. Nu, kio estas farota? Vi ne povos promenadi en la Nigra Lando en nenio krom via haŭto, sinjoro Frodo.

— Ili forprenis ĉion, Sam, — diris Frodo. — Ĉion, kion mi havis. Ĉu vi komprenas? *Ĉion*! — Li kaŭris denove sur la planko kun la klinita kapo, kiam la propraj vortoj rivelis al li la kompletecon de la katastrofo, kaj malespero inundis lin. — La komisio malsukcesis, Sam. Eĉ se ni eliros el ĉi tie, ni ne povos eskapi. Nur elfoj kapablos eskapi. Foren, foren el Mez-Tero, fore malproksimen trans la maron. Se eĉ ĝi estas sufiĉe larĝa por bari la Ombron.

— Ne, *ne* ĉion, sinjoro Frodo. Kaj ĝi ne malsukcesis, ankoraŭ ne. Prenis ĝin mi, sinjoro Frodo, pardonpete. Kaj mi tenis ĝin sekura. Ĝi pendas nun sur mia kolo, kaj terura ŝarĝo ĝi estas cetere. — Sam palpserĉis la Ringon kaj ties ĉeneton. — Sed supozeble vi devas nun repreni ĝin. — Kiam nun venis la momento, Sam malvolontis transdoni la Ringon kaj per ĝi denove ŝarĝi la mastron.

— ĉu vi havas ĝin? — anhelis Frodo. — Vi havas ĝin ĉi tie, ĉu? Sam, vi estas mirindulo! — Subite kaj strange lia tono ŝanĝiĝis. — Donu ĝin al mi! — li kriis, stariĝante, etendante sian treman manon.

— Tuj redonu ĝin al mi! Vi ne rajtas havi ĝin!

— En ordo, sinjoro Frodo, — diris Sam, iom konsternite. — Jen ĝi!

— Malrapide li eltiris la Ringon kaj pasigis la ĉeneton trans sian kapon. — Sed vi estas nun en Mordoro, sinjoro, kaj kiam vi eliros vi vidos la Fajran Monton kaj tiel plu. Vi trovos la Ringon jam tre danĝera kaj malfacile portebla. Se la tasko estas tro malfacila, mi eble povus dividi ĝin, ĉu?

— Ne, ne! — kriis Frodo, kaptante la Ringon kaj ĉeneton el la manoj de Sam. — Ne, tion vi ne faros, ŝtelinto! — Li anhelis, fiksrigardante Samon per la okuloj larĝaj pro timo kaj malamikeco. Tiam subite, tenante la Ringon en unu mano pugnigita, li staris konsternite. Nebuleto ŝajnis foriĝi de sur liaj okuloj, kaj li pasigis manon sur sia doloranta frunto. La hida vizio ŝajnis al li tiom reala, ĉar li estis ankoraŭ duone perpleksigita pro vundiĝo kaj timo. Sam antaŭ liaj okuloj estis refariĝinta orko, gapaĉanta kaj palpanta lian trezoron, fia kreito kun la avidaj okuloj kaj bavanta buŝo. Sed jam la vizio forpasis. Jen estis Sam genuanta antaŭ li, kun la dolortordita vizaĝo, kvazaŭ li estus kore trapikita; larmoj ekfluis el liaj okuloj.

— Ho Sam! — kriis Frodo. — Kion mi diris? Kion mi faris? Pardonu

min! Post ĉio, kion vi faris. Jen la horora potenco de la Ringo. Mi volus, ke ĝi neniam, neniam estus trovita. Sed ne atentu min, Sam. La ŝarĝon mi devos porti ĝis la fino. Tio ne estas ŝanĝebla. Vi ne povas interveni inter mi kaj ĉi tiu sorto.

— En ordo, sinjoro Frodo, — diris Sam, viŝante manike siajn okulojn. — Mi komprenas. Sed mi povos ankoraŭ helpi, ĉu ne? Mi devas elirigi vin el ĉi tiu loko. Tuj, ĉu ne? Sed unue vi bezonas vestaĵojn kaj ekipaĵon, kaj poste iom da nutraĵo. Plej facile estos pri la vestaĵoj. Ĉar ni estas en Mordoro, prefere ni vestu nin mordormaniere; kaj ĉiuokaze elektebleco mankas. Necesos esti orka por vi, sinjoro Frodo, bedaŭrinde. Kaj ankaŭ por mi. Se ni iros kune, prefere ni akordu. Nun volvu vin per tiu ĉi!

Sam malagrafis sian grizan mantelon kaj ĵetis ĝin sur la ŝultrojn de Frodo. Poste, demetinte sian tornistron, li kuŝigis ĝin sur la plankon. Li elingigis Pikilon. Flagro apenaŭ vidiĝis sur ĝia klingo.

— Mi forgesis pri ĉi tiu, sinjoro Frodo, — li diris. — Ne, ne ĉion ili akiris! Vi pruntedonis al mi Pikilon, se vi memoras, kaj la vitraĵon de l' Damo. Mi ankoraŭ havas ilin ambaŭ. Sed pruntedonu ilin al mi iomete pli longe, sinjoro Frodo. Mi devas iri por vidi, kio estas trovebla. Restu ĉi tie. Iom ĉirkaŭmarŝu kaj malrigidigu la krurojn. Mi ne longe forestos. Ne necesos iri tre malproksimen.

— Estu singarda, Sam! — diris Frodo. — Kaj rapidu! Eble vivas ankoraŭ orkoj embuskantaj.

— Tion mi devas riski, — diris Sam.

Li paŝis al la klappordo kaj subeniris per la eskalo. Post minuto lia kapo reaperis. Li ĵetis longan tranĉilon sur la plankon.

— Jen io eble utila, — li diris. — Li estas mortinta: tiu kiu vipis vin. Rompis al si la kolon, ŝajne, pro la hasto. Nun suprentiru la eskalon, se vi povas, sinjoro Frodo, kaj ne subenigu ĝin, ĝis vi aŭdos min diri la pasvorton. Mi vokos: "Elbereta". Tion diras la elfoj. Neniu orko dirus tion.

Frodo sidis dum kelka tempo kaj tremetis, dum teruraj timoj persekutis unu alian en lia menso. Poste li stariĝis, kuntiris ĉirkaŭ sin la grizan elfan mantelon, kaj por okupi sian menson komencis marŝi tien-reen, strabante kaj ŝovante la nazon en ĉiun angulon de sia karcero.

Post ne tre longe, kvankam la timo ŝajnigis ĝin minimume unu horo, li aŭdis la voĉon de Sam, vokanta mallaŭte desube: "Elbereta, Elbereta". Frodo mallevis la eskalon. Supreniĝis Sam, anhelante, portante pezan pakaĵegon sur la kapo. Li surterigis ĝin falbrue.

— Rapidu jam, sinjoro Frodo! — li diris. — Mi devis iom serĉi por trovi ion sufiĉe malgrandan por niaspecaj uloj. Ni devos adaptiĝi. Sed necesas rapidi. Mi renkontis nenion vivan, kaj nenion mi vidis, sed mi ne

estas trankvila. Al mi ŝajnas, ke tiu ĉi loko estas gvatata. Mi ne povas klarigi tion, sed nu: sentiĝas al mi, kvazaŭ unu el tiuj naŭzaj flugantaj Rajdantoj ĉirkaŭumas, supre en la mallumo, kie li estas nevidebla.

Li malfermis la pakaĵon. Frodo rigardis malestime la enhavon, sed elekto ne estis: li devis surmeti tiujn aĵojn, aŭ resti nuda. Troviĝis longa vila pantalono el malpura bestfelo, kaj tuniko el malpura ledo. Li surmetis ilin. Super la tunikon iris kiraso kun fortika fermaŝo, mallonga por plenkreska orko, tro longa kaj peza por Frodo. Ĉirkaŭ ĝin li ligis zonon, de kiu pendis mallonga ingo enhavanta larĝidingan pikglavon. Sam alportis plurajn orkajn kaskojn. Unu el ili sufiĉe bone laŭmezuris por Frodo, nigra ĉapo kun fera rando, kaj feraj ringoj ledkovritaj sur kiuj estis pentrita ruĝe la Misa Okulo super la beksimila nazprotektilo.

— La morgulaĵoj, ekipaĵo de Gorbago, mezuris pli taŭge kaj estis pli bone farita, — diris Sam; — sed ne estus konvene, mi konjektas, portadi ties insignojn en Mordoro post la okazintaĵoj ĉi tie. Nu jen, sinjoro Frodo. Perfekta orketo, se mi rajtas kuraĝi — almenaŭ vi estus tia, se ni povus kovri vian vizaĝon per masko, havigi al vi brakojn pli longajn, kaj igi vin kurbkrura. Tio ĉi kaŝos iom el la perfidaĵoj. — Li metis grandan nigran mantelon ĉirkaŭ la ŝultrojn de Frodo. — Jam vi pretas! Vi povos preni ŝildon dumire.

— Kio pri vi, Sam? — diris Sam. — Ĉu ni ne intencas akordi?

— Nu, sinjoro Frodo, mi pripensis, — diris Sam. — Prefere mi ne postlasu iom el miaj aĵoj, kaj ni tion ne povas detrui. Kaj mi ne povos surmeti orkan maŝkirason sur mian tutan vestaĵon, ĉu? Mi simple devos kovri min.

Li surgenuiĝis kaj zorge faldis sian elfan mantelon. Ĝi ampleksis surprize malgrandan rulaĵon. Tiun li metis en sian tornistron kuŝantan sur la planko. Stariĝinte, li pendigis ĝin surdorse, surkapigis orkan kaskon kaj ĵetis alian nigran mantelon sur la ŝultrojn.

— Jen! — li diris. — Jam ni akordas, sufiĉagrade. Kaj nun ni ekiru!

— Mi ne povos kuri la tutan vojon, Sam, — diris Frodo kun tordita rideto. — Mi esperas, ke vi enketis pri tavernoj sur la vojo? Aŭ ĉu vi forgesis pri nutraĵoj?

— Gardu min, mi ja forgesis! — diris Sam kaj konsternite fajfis. — Benu min, sinjoro Frodo, sed vi sukcesis igi min malsata kaj soifa! Mi ne scias, kiam lastfoje guto aŭ manĝaĵero trapasis miajn lipojn. Mi forgesis pri tio, klopodante trovi vin. Sed mi pripensu! Kiam mi lastfoje rigardis, mi havis proksimume sufiĉon da tiu vojpano, kaj da tio, kion donis al ni komandanto Faramiro, por teni min surkrura dum du semajnoj prudentaj. Sed se restas guto en mia botelo, ne estas pli ol tiom. Tio ne sufiĉos por du, neniel. Ĉu ne manĝas orkoj, kaj ĉu ili ne trinkas? Aŭ ĉu ili vivas nur per naŭza aero kaj veneno?

— Ne, ili manĝas kaj trinkas, Sam. La Ombro, kiu bredis ilin, kapablas nur kripligi, ĝi ne povas krei: ne realajn proprajn aĵojn. Mi opinias, ke ĝi ne vivigis la orkojn, ĝi nur ruinigis kaj tordis ilin; kaj se ili entute vivu, necesas ke ili vivu kiel aliaj vivantaĵoj. Fiajn akvojn kaj naŭzajn viandojn ili ensorbas se nenio pli bona estas akirebla, sed ne venenon. Ili manĝigis min, do mi statas pli kontentige ol vi. Devas esti ie en tiu ĉi loko manĝaĵoj kaj trinkaĵoj.

— Sed mankas tempo por serĉi ilin, — diris Sam.

— Nu, la aferoj statas pli bone ol vi supozas, — diris Frodo. — Mi spertis iom da bonŝanco dum vi forestis. Efektive ili ne prenis ĉion. Mi trovis mian manĝosakon inter ĉifonoj sur la planko. Ili taŭzis tra ĝi, kompreneble. Sed mi konjektas, ke ili malŝatis mem la aspekton kaj odoron de la *lembaso*, eĉ pli ol Golumo. Ĝi estis disĵetita, kaj iom el ĝi estis surtretita kaj rompita, sed mi kunrastis ĝin. Ne estas multe malpli ol vi havas. Sed ili forprenis la nutraĵojn de Faramiro, kaj ili distranĉis mian akvujon.

— Nu, ne plu restas dirotaĵo, — diris Sam. — Ni havas sufiĉe por komenci. Sed pri la akvo estos maloportune. Sed ek, sinjoro Frodo! Ni ekiru, aŭ tuta lago ne utilos al ni!

— Ne ĝis vi plenigos vian buŝon, Sam, — diris Frodo. — Mi neviĝos. Jen, prenu ĉi elfan kukon, kaj trinku vian lastan guton en via botelo! La tuta afero estas komplete senespera, do ne helpas zorgoj pri la morgaŭo. Ĝi verŝajne ne alvenos.

Finfine ili ekiris. Suben per la eskalo ili grimpis, kaj poste Sam prenis kaj kuŝigis ĝin en la koridoro apud la kuntirita kadavro de la falinta orko. La ŝtuparo estis malluma, sed sur la tegmento estis ankoraŭ videbla la brilego de la Monto, kvankam ĝi nun formortadis al malafabla ruĝo. Ili levis du ŝildojn por kompletigi sian aliveston kaj poste pluiris.

Suben laŭ la ŝtuparego ili plandis. La alta ĉambro malantaŭe, kie ili rerenkontiĝis, ŝajnis preskaŭ hejmeca: nun ili estis denove neŝirmitaj, kaj

teruro laŭiris la murojn. Ĉiuj eble estis mortintaj en la turego de Cirito Ungol, sed ĝi estis ankoraŭ trempita en timo kaj miso.

Finfine ili atingis la pordon al la ekstera korto, kaj tie ili haltis. Eĉ de tie, kie ili staris, ili sentis la malicon de la Gardantoj bati sur ilin, nigraj silentaj figuroj ambaŭflanke de la pordo tra kiu vidiĝis malklare la brilo de Mordoro. Dum ili tredis sian vojon inter la hidaj kadavroj de la orkoj, paŝado iĝis pli malfacila. Eĉ antaŭ ol ili alvenis la arkaĵon ili estis haltigitaj. Plu moviĝi unu colon estis doloro kaj laceco de volo kaj membroj.

Frodo malhavis forton por tia batalo. Li sinkis sur la teron kaj murmuris:

— Mi ne kapablas pluiri, Sam. Mi estas svenonta. Mi ne scias, kio okazas al mi.

— Mi scias, sinjoro Frodo. Regu vin jam! Temas pri la pordo. Tie troviĝas ia fimagio. Sed mi trairis, kaj mi intencas eliri. Ne povas esti pli danĝere ol antaŭe. Ek antaŭen!

Sam eltiris denove la elfan vitraĵon. Kvazaŭ por honori lian bravecon, kaj ornami grandioze lian fidelan brunan hobitan manon, kiu plenumis tiajn bravajn farojn, la flakoneto disbrilis subite, tiel ke la tuta ombreca korto estis lumigita per blindiga radiado fulmsimila; sed ĝi restis senŝancele kaj ne forpasis.

— *Gilthoniel, A Elbereth*! — Sam kriis. Ĉar, li ne sciis kial, lia penso resaltis subite al la elfoj en la Provinco kaj al la kanto, kiu forpelis la Nigrajn Rajdantojn inter la arboj.

— *Aiya elenion ancalima*! — kriis Frodo denove de malantaŭe. La volo de la Gardantoj estis rompita tiel subite, kiel rompiĝas ŝnureto, kaj Frodo kaj Sam stumblis antaŭen. Poste ili kuris. Tra la pordo kaj preter la sidantaj figuregoj kun la ekbrilaj okuloj. Aŭdiĝis krako. La arkaĵa ĉefŝtono falegis preskaŭ sur iliajn kalkanojn, kaj la supra muro diseriĝis kaj falis ruiniĝante. Nur harlarĝe ili eskapis. Sonorilo tintegis; kaj de la Gardantoj leviĝis alta kaj timiga lamento. Fore supre en la mallumo ĝi estis respondita. El la nigra ĉielo venis, falante kiel sago, figuro flugilhava, ŝirante la nubojn kun hidega kriĉego.

2

La Ombra Lando

Al Sam restis sufiĉe da sagaco, ke li reŝovu la flakoneton sur sian bruston.

— Kuru, sinjoro Frodo! — li kriis. — Ne, ne tien! Trans la muro estas kruta falejo. Sekvu min!

Sur la vojo for de la pordo ili fuĝis. Post kvindek paŝoj, post rapida kurbiĝo ĉirkaŭ elstaran bastionon de la klifo, ĝi forgvidis ilin el vid~ ebleco de la turego. Ili provizore eskapis. Kliniĝante malantaŭen kontraŭ la roko, ili enspiris, kaj poste ili kroĉis siajn korojn. Sidante jam sur la muro apud la ruiniĝinta pordo la nazgulo elpuŝis siajn terurajn kriojn. Ĉiuj klifoj reeĥis.

Timigite ili stumblis antaŭen. Baldaŭ la vojo kurbiĝis orienten de~ nove, kaj dum horora momento ĝi videbligis ilin de la turego. Transkurante ili retrorigardis kaj vidis la grandan nigran figuron sur la krenelaro; poste ili plonĝis suben inter altaj rokmuroj en tratranĉejo, kiu iris suben apike al la Morgula Vojo. Ili venis al la vojrenkontiĝo. Ankoraŭ mankis signoj de orkoj kaj respondo al la krio de l' *nazgulo*; sed ili sciis, ke la silento ne longe daŭros. Iumomente la ĉasado komenciĝos.

— Tio ne taŭgas, Sam, — diris Frodo. — Se ni estus realaj orkoj, ni devus rekuri al la turego, ne forkuri. La unua renkontota malamiko rekonos nin. Ni devas iel forlasi ĉi tiun vojon.

— Sed ni ne povas, sen flugiloj, — diris Sam.

La orientaj facoj de Efelo Duad estis apikaj, falante klife kaj krutegaĵe al la nigra kavo kuŝanta inter ili kaj la interna firsto. Mallonge post la vojrenkontiĝo, post alia apika kliniĝo, fluganta ŝtonponto transsaltis la abismon kaj portis la vojon transen al la malglataj deklivoj kaj valetoj de Morgajo. Per senespera akcelego Frodo kaj Sam trakuris la ponton; sed apenaŭ ili atingis ties transan ekstremon, ili jam aŭdis la persekuton komenciĝi. Fore malantaŭ ili, jam alte super la montoflanko, baŭmis la turego Cirito Ungol, kies ŝtonoj malhele ardis. Subite ĝia malmiela sonorilo denove tintegis, kaj poste frakasige kariljonis.

Aŭdiĝis kornoj. Kaj nun de antaŭ la ponto venis respondaj krioj. Sube en la malhela kavo, forbarite de la kaduka brilego de Orodruino, Frodo kaj Sam ne povis vidi antaŭen, sed jam ili aŭdis stamfadon de feramitaj piedoj, kaj sur la vojo sonis la rapida klakado de hufoj.

— Rapide, Sam! Ni transiru! — kriis Frodo. Ili surgrimpis la malaltan

parapeton de l' ponto. Feliĉe ne plu estis terura falebleco abismen, ĉar la deklivoj jam leviĝis preskaŭ ĝis la nivelo de la vojo; sed estis tro mallume por ke ili divenu la profundon.

— Nu, jen la okazo, sinjoro Frodo, — diris Sam. — Adiaŭ!

Li malkroĉiĝis. Frodo sekvis lin. Kaj ĝuste dumfale ili aŭdis tumulton de rajdistoj transkurantaj la ponton kaj klakadon de orkaj piedoj postkurantaj. Sed Sam ridus, se li riskemus. Duontiminte frakasan plonĝon sur nevidatajn rokojn, la hobitoj surteriĝis, post falo ne pli ol dek-du-futa, kun batbruo kaj kraksono, al la lasta atenditaĵo: plektiĝo de dornaj arbustoj. Tie Sam kuŝis senmova, kviete suĉante la gratitan manon. Kiam forpasis la bruo de hufoj kaj piedoj, li riskis flustron:

— Mi estu benata, sinjoro Frodo, sed mi tute ne sciis, ke kreskas io en Mordoro! Sed se mi ja scius, ĝuste ion tian mi serĉus. Jenaj dornoj certe longas unu futon, laŭ ilia sentiĝo; ili trapikis ĉion, kion mi surmetis. Se nur mi surmetus tiun maŝkirason!

— Orka kiraso ne forbaras tiujn dornojn, — diris Frodo. — Eĉ leda brustovesto ne efikas.

Nur barakte ili sukcesis forlasi la densejon. La dornoj kaj ĉiroj estis ferdrate fortikaj kaj krifare kroĉemaj. Iliaj manteloj estis ŝiritaj kaj ĉifitaj antaŭ ol ili fine liberiĝis.

— Nun ni iros suben, Sam, — Frodo flustris. — Suben rapide en la valon, kaj poste norden kiel eble plej baldaŭ.

Tago estis revenanta en la mondo ekstere, kaj fore preter la mornoj de Mordoro la suno grimpis trans la orientan randon de Mez-Tero; sed ĉi tie ĉio estis ankoraŭ nokte malhela. La Monto subbrulis kaj ĝiaj fajroj estingiĝis. La brilo forvelkis de la klifoj.

La orienta vento, blovinta de kiam ili lasis Itilion, nun ŝajnis mortinta. Malrapide kaj dolore ili grimpis suben, palpante, stumblante, rampante inter rokoj kaj dornarbustoj kaj malviva lignaĵo en la blindaj ombroj, suben kaj suben ĝis ili ne povis plu iri. Finfine ili haltis, kaj sidiĝis flank-al-flanke, dorse al rokego. Ambaŭ ŝvitis.

— Se Ŝagrato mem proponus al mi glason da akvo, mi premus lian manon, — diris Sam.

— Ne diru tiajn aferojn! — diris Frodo. — Tio nur mise influas. — Poste li etendis sin, turnkapan kaj lacegan, kaj kelkan tempon li ne plu parolis. Poste li barakte restariĝis. Mirigite li konstatis, ke Sam dormas. — Vekiĝu, Sam! — li diris. — Ek al! Jam tempo klopodi denove.

Sam stumble stariĝis.

— Jen surprizo! — li diris. — Verŝajne mi ekdormis. Jam delonge, sinjoro Frodo, mi ne dormis normale, kaj miaj okuloj simple fermiĝis

propravole.

Frodo nun gvidis, norden laŭ lia konjekto, inter la ŝtonoj kaj rokoj dense kuŝantaj sur la fundo de la ravinego. Sed baldaŭ li haltis denove.

— Ne funkcias, Sam, — li diris. — Mi ne povas toleri ĝin. Jenan maŝkirason mi aludas. Ne en mia nuna stato. Eĉ mia mitrila vesto ŝajnis peza, kiam mi estis laca. Tiu ĉi multe pli pezas. Kaj kiel ĝi utilas? Mi ne sukcesos trapasi per batalado.

— Sed eble ni devos iom batali, — diris Sam. — Kaj ekzistas ponardoj kaj vagemaj sagoj. Tiu Golumo ne mortis, ekzemple. Al mi ne plaĉas pensi pri vi kun nur peco da ledo inter vi kaj trapiko en mallumo.

— Aŭskultu, kara knabo Sam, — diris Frodo: — mi estas laca, lacega, al mi espero ne restas. Sed mi devas daŭre klopodi por alveni la Monton, tiel longe, kiel mi kapablas moviĝi. Sufiĉas la Ringo. Tiu ĉi aldonita pezo mortigas min. Ĝi devas rifuziĝi. Sed ne supozu min maldanka. Mi malamas pensi pri la fia laboro, kiun vi certe plenumis inter la kadavroj por trovi ĝin por mi.

— Ne priparolu tion, sinjoro Frodo. Estu benita! Mi portus vin sur la dorso, se mi povus. Forigu ĝin do!

Frodo flankenmetis sian mantelon, demetis la orkan kirason kaj forĵetis ĝin. Li tremetis.

— Kion mi fakte bezonas, tio estas io varma, — li diris. — Fariĝis froste, aŭ eble mi malvarmumis.

— Vi rajtas havi mian mantelon, sinjoro Frodo, — diris Sam, demetis sian tornistron kaj elprenis la elfan mantelon. — Ĉu plaĉas, sinjoro Frodo? Volvu vin strikte per tiu orka ĉifono, kaj ligu la zonon ekstere. Poste tio ĉi povos kovri la tuton. Ĝi ne aspektas tute orkeca, sed ĝi varmigos vin; kaj mi opinias, ke ĝi gardos vin kontraŭ difektiĝo pli bone ol ajna alia kostumo. Ĝin faris la Damo.

Frodo akceptis la mantelon kaj agrafis la broĉon.

— Jam pli bone, — li diris. — Mi sentas min multe malpli peza. Jam mi povos pluiri. Sed tiu ĉi blindiga mallumo ŝajnas tuŝi mian koron. Kuŝante en la prizono mi provis rememori Brandovinon kaj la Arbarfinon, kaj la Akvon trapasanta la muelilon ĉe Hobiturbo. Sed ilin mi ne povas nun vidi.

— Vidu jam, sinjoro Frodo, ĝuste vi ĉi-foje parolas pri akvo! Se nur la Damo povus vidi aŭ aŭdi nin, mi dirus al ŝi: “Moŝtino, nia tuta bezono estas lumo kaj akvo: nur akvo pura kaj taglumo klara, pli bonaj ol juveloj, pardonpete”. Sed longa estas la vojo ĝis Lorieno.

Sam suspiris kaj gestis per sia mano al la altaĵoj de Efelo Duad, nun nur diveneblaj kiel nigreco pli profunda kontraŭ la nigra ĉielo.

Ili ekiris denove. Ili ne longe iris, kiam Frodo paŭzis kaj diris:

— Nigra Rajdanto troviĝas super ni. Mi sentas tion. Prefere ni senmoviĝu por kelka tempo.

Kaŭrante sub rokego ili sidis retrofrontante okcidenten kaj dum kelka tempo ne parolis. Poste Frodo eligis malŝarĝiĝan suspiron.

— Ĝi pasis, — li diris.

Ili stariĝis, kaj ambaŭ gapis mirigite. Fore maldekstre, sude, kontraŭ ĉielo, kiu griziĝis, la pintoj kaj altaj firstoj de la granda montaro komencis vidiĝi malhelaj kaj nigraj, formoj videblaj. Lumo kreskis malantaŭ ili. Malrapide ĝi rampis norden. Okazis batalo forsupre en la altaj spacoj de la aero. La ondantaj nuboj de Mordoro estis retropuŝataj, iliaj randoj ĉifiĝis, kiam vento el la viva mondo alvenis kaj balais la haladzojn kaj fumojn al la malhela lando de ilia hejmo. Sub la leviĝantaj orloj de la morna baldakeno malforta lumo likiĝis en Mordoron kvazaŭ pala mateno tra la polvoŝmirita fenestro de karcero.

— Rigardu tion, sinjoro Frodo! — diris Sam. — Rigardu tion! La vento deviis. Io okazas. Ne ĉio prosperigas lin. Lia mallumo diseriĝas tie ekstere en la mondo. Mi volus vidi la okazantaĵon!

Estis la mateno de la dek-kvina de marto, kaj super la valo de Anduino la suno leviĝis super la orienta ombro, kaj sud-okcidenta vento blovis. Teodeno kuŝis mortanta sur la Pelenora Kampo.

Dum Frodo kaj Sam staris rigardante, la lumrando etendiĝis tra la tuta linio de Efelo Duad, kaj poste ili vidis formon moviĝantan rapidege el la okcidento, komence nur nigran makuleton antaŭ la brileta strio super la montpintoj, sed kreskantan, ĝis ĝi plonĝis kiel sago en la malhelan baldakenon kaj pasis alte super ili. Dumire ĝi eligis longan akran krion, sed tiu krio ne plu teruris ilin: ĝi estis krio de veo kaj konsterniĝo, misaŭgura informo por la Malhela Turego. La Mastro de l' Ringofantomoj jam plenumis sian sorton.

— Ĉu mi ne diris al vi? Io okazas! — kriis Sam. — "La milito bone progresas", diris Ŝagrato, sed Gorbago ne certis. Kaj ankaŭ li tie estis. La aferoj heliĝas, sinjoro Frodo. Ĉu vi nun ne havas iom da espero?

— Nu, ne, fakte ne multon, — Frodo suspiris. — Tio okazas fore ekster la montaro. Ni iras orienten, ne okcidenten. Kaj mi tiom lacas. Kaj la Ringo tiom pezas, Sam. Kaj mi komencas vidi ĝin per mia menso la tutan tempon, kiel grandan fajroradon.

La mallonga entuziasmiĝo de Sam tuj resinkis. Li rigardis zorgoplene sian mastron kaj kaptis ties manon.

— Vidu, sinjoro Frodo! Mi jam havas unu el miaj deziraĵoj: iom da lumo. Sufiĉe por helpi nin, kaj tamen supozeble ĝi estas ankaŭ danĝera. Provu iom pli antaŭen, kaj poste ni kuŝos unu apud la alia kaj iom ripozos.

Sed nun glutu ereton, iometon el la elfa nutraĵo, tio eble kuraĝigos vin.

Dividinte oblaton da *lembaso*, kaj maĉante ĝin laŭeble en la sekegaj buŝoj, Frodo kaj Sam plandis antaŭen. La lumo, kvankam ne pli ol griza krepusko, jam sufiĉis por ke ili vidu, ke ili troviĝas profunde en la valo inter la montoj. Ĝi deklivis malabrupte norden, kaj ĉe ĝia fundo estis la kuŝejo de rivereto nun seka kaj velkinta. Trans la ŝtonoza fluejo ili vidis piedkreitan padon, kiu serpenturnis ĉe la subo de l' okcidentaj klifoj. Se ili scius, ili povus atingi ĝin pli rapide, ĉar ĝi estis pado, kiu forlasis la ĉefan Morgulan Vojon ĉe la okcidenta pontekstremo kaj subeniris per ŝtuparo tranĉita en la roko ĝis la vala fundo. Ĝin uzis patroloj aŭ kurieroj irantaj rapide al malpli gravaj postenoj kaj fortikaĵoj norde, inter Cirito Ungol kaj la stretoj de Isenbuŝo, la feraj makzeloj de Karaĥo Angren.

Estis al la hobitoj danĝere utiligi tiun padon, sed rapideco necesis al ili, kaj Frodo sentis, ke li ne povos fronti la strebon stumbliri inter la rokegoj aŭ en la senpadaj valoj de Morgajo. Kaj li taksis, ke norden estus, eble, la vojo, kiun iliaj ĉasantoj malplej atendus, ke ili iru. La vojo orienten al la ebenaĵo, aŭ la pasejo okcidenten, tiujn ili unue traserĉus plej ĝisfunde. Nur kiam li estos sufiĉe norde de la turego laŭintence li turnos sin kaj serĉos iun vojon por iri orienten, orienten dum tiu lasta malfacilega stadio de la vojaĝo. Do nun ili transiris la ŝtonozan fluejon kaj laŭiris la orkan padon, kaj dum kelka tempo ili marŝis laŭlonge de ĝi. La klifoj maldekstre superkliniĝis, kaj oni ne povis vidi ilin desupre; sed la pado ofte deviis, kaj je ĉiu devio ili kaptis la glavtenilojn kaj pluiris singarde.

La lumo ne plifortiĝis, ĉar Orodruino daŭre elsputis fumegon kiu, supren batite de la kontraŭaj aeroj, pli kaj pli altiĝis, ĝis ĝi alvenis regionon super la vento kaj disetendiĝis je senmezura tegmento, kies centra pilastro leviĝis el la ombroj ekster ilia vidkampo. Ili jam plandis dum pli ol unu horo, kiam ili aŭdis sonon, kiu haltigis ilin. Nekredeble, sed nemiskompreneble — akvo fluetis. El ravineto maldekstre, tiel akra kaj mallarĝa, ke ĝi aspektis kvazaŭ la nigra klifo estus fendita per granda hakilo, akvo subengutis; la lasta restaĵo, eble, de iu dolĉa pluvo rikoltita el sunlumaj maroj, sed mise destinita fali finfine sur la murojn de la Nigra Lando kaj vagi senutile suben en la polvon. Ĉi tie ĝi venis el la rokaĵo per eta falanta rojeto, kaj fluis trans la padon, kaj turniĝinte suden ĝi forfluis rapide por perdiĝi inter la mortaj ŝtonoj. Sam alsaltis ĝin.

— Se mi iam denove vidos la Damon, mi rakontos al ŝi! — li ekkriis. — Lumon kaj nun akvon! — Li ĉesis. — Lasu, ke mi trinku la unua, sinjoro Frodo.

— Bone, sed spaco sufiĉas por du.

— Ne tion mi celis. Mi volis diri: se ĝi estas veneno, aŭ io kio vidigos

sian malutilon rapide, nu, prefere mi ol vi, mastro, se vi komprenas min.

— Mi komprenas. Sed mi opinias, ke ni kune fidu nian bonŝancon, Sam; aŭ nian benatecon. Tamen estu singarda nun, se ĝi tre malvarmas!

La akvo estis malvarmeta sed ne glacia, kaj ĝi havis guston malagrablan, samtempe amaran kaj oleecan, aŭ tiel oni dirus hejme. Ĉi tie ĝi ŝajnis pli ol laŭdinda kaj ekster timo aŭ prudento. Ili sattrinkis, kaj Sam replenigis sian botelon. Poste Frodo sentis sin pli kontenta, kaj ili pluiris kelkajn mejlojn, ĝis larĝiĝo de la vojo kaj la komenciĝo de kruda muro apud ĝia rando avertis, ke ili proksimiĝas al alia orka fortikaĵo.

— Ĉi tie ni turniĝu flanken, Sam, — diris Frodo. — Kaj ni devas direktiĝi orienten. — Li ĝemspiris rigardante la mornajn firstojn trans la valo. — Restas al mi ĝuste sufiĉe da forto por trovi ian truon tie supre. Kaj poste mi devos ripozi iomete.

La riverfundo estis nun iom sub la padnivelo. Ili stumbliris suben al ĝi kaj komencis transiri. Surprizite ili trovis malhelajn flakojn nutritaj de akvofadenoj fluantaj de iu monto pli alte en la valo. Ĉe ties randoj sub la montoj okcidente Mordoro estis lando mortanta, sed ĝi ankoraŭ ne estis morta. Kaj ĉi tie ankoraŭ kreskis aĵoj raspaj, torditaj, amaraj, baraktantaj por vivi. En la valoj de Morgajo aliflanke de la valo embuskis vepraj arboj kaj kroĉiĝis, maldelikataj grizaj herbotufoj luktis kontraŭ la ŝtonoj, kaj velkaj muskoj rampis sur ili; ĉie diskuŝis grandaj tordiĝantaj dornplektaĵoj. Iuj havis longajn pikajn dornojn, iuj hokajn pikilojn, kiuj ŝiris tranĉilece. La malviglaj ŝrumpintaj folioj de la pasinta jaro pendis sur ili, grincante kaj klakante en la malgajaj aeroj, sed ties vermtrafitaj burĝonoj nur nun komencis malfermiĝi. Muŝoj, grizbrunaj, grizaj, aŭ nigraj, markitaj kiel orkoj per ruĝa okulforma makulo, zumis kaj pikis; kaj super la dornplektaĵoj nuboj da malsataj kuloj dancis kaj giris.

— Orka ekipaĵo ne taŭgas, — diris Sam svingante siajn brakojn. — Mi ŝatus havi la felon de orko!

Finfine Frodo ne povis pluiri. Ili jam grimpis supren laŭ mallarĝa dekliva ravineto, sed ankoraŭ necesis longa vojo ĝis ili povos eĉ ekvidi la lastan rokecan firston.

— Mi devos nun ripozi, Sam, kaj laŭeble dormi, — diris Frodo. Li ĉirkaŭrigardis, sed ŝajnis troviĝi nenio, kien povus besto rampi en tiu malagrabla regiono. Finfine elĉerpite, ili ŝteliris sub dornaĵkurtenon, kiu pendis kvazaŭ mato sur malalta rokfaco.

Tie ili sidis kaj manĝis tiom, kiom ili povis. Rezervante la valoran *lembason* por la misaj tagoj venontaj, ili manĝis duonon da tio, kio restis en la sako de Sam el la provianto de Faramiro: kelkajn sekajn fruktojn kaj peceton da sekigita viando; kaj ili glutetis iom da akvo. Ili jam trinkis

denove el la valaj lagetoj, sed refoje ili tre soifis. En la aero de Mordoro estis amara odoro, kiu sekigis la buŝon. Kiam Sam pripensis akvon, eĉ lia optimisma spirito kuntiriĝis. Trans Morgajo estis transirenda la terura ebenaĵo Gorgoroto.

— Nu, vi ekdormu la unua, sinjoro Frodo, — li diris. — Jam denove malheliĝas. Mi kalkulas, ke tiu ĉi tago preskaŭ finiĝis.

Frodo ĝemspiris kaj jam endormiĝis preskaŭ antaŭ ol tiuj vortoj estis parolitaj. Sam luktis kontraŭ la propra laco, kaj li prenis la manon de Frodo; kaj tie li sidis silente ĝis la nokto nigre profundiĝis. Tiam finfine, por teni sin maldorma, li elrampis el la kaŝejo kaj elrigardis. La tereno ŝajnis plena je grincado kaj krakado kaj kaŝemaj bruoj, sed mankis sono de voĉoj aŭ piedoj. Forsupre super Efelo Duad en la okcidento la nokta ĉielo estis ankoraŭ malklara kaj pala. Tie, gvatantan inter la nubĉifonoj super alta pinto inter la montoj, Sam vidis ekbrili dum kelka tempo blankan stelon. Ties beleco emociis lian koron, dum li rigardis supren el la forlasita lando, kaj espero revenis al li. Ĉar kvazaŭ sago, klara kaj malvarma, lin trapikis la penso, ke finfine la Ombro estas nur malgranda kaj pasema afero: ekzistas lumo kaj alta belo eterne ekster ĝia atingo. Lia kanto en la turego estis pli defia ol espera; sed tiam li pensis pri si. Nun, momente, lia sorto, kaj eĉ tiu de lia mastro, ĉesis ĝeni lin. Li rampis denove sub la dornkreskaĵon kaj kuŝiĝis flanke de Frodo, kaj forpelinte la tutan timon, li ĵetis sin en profundan malzorgan dormon.

Ili vekiĝis samtempe, man-en-mane. Sam estis preskaŭ freŝa, preta por nova tago; sed Frodo ĝemspiris. Lia dormo estis maltrankvila, plena je sonĝoj pri fajro, kaj la vekiĝo havigis al li neniom da konsolo. Tamen al lia dormo ne tute mankis kuraca efiko: li estis pli forta, pli kapabla porti sian ŝarĝon tra ankoraŭ unu stadio. Ili ne konis la horon, nek kiom longe ili dormis; sed post mordeto da manĝaĵo kaj gluteto da akvo ili pluiris laŭ la ravino, ĝis tiu finiĝis per abrupta deklivo el ŝtonsplitoj kaj forglitaj ŝtonoj. Tie la lastaj vivantaĵoj rezignis pri sia lukto; la supraĵo de Morgajo estis senherba, nuda, akrangula, senviva kiel ardezo.

Post multe da vagado kaj serĉado ili trovis lokon, kie ili povos grimpi, kaj tra lastaj cent futoj da rampa stumbliro ili troviĝis supre. Ili venis al fendaĵo inter du malhelaj rokegoj, kaj trapasinte ili trovis sin ĉe la rando mem de la lasta barilo de Mordoro. Sube, funde de altaĵo proksimume mil-kvincent-futa, kuŝis la interna ebenaĵo etendiĝanta foren en senforman sombron ekster ilia vidkampo. La vento blovis nun el la okcidento, kaj la nubegoj estis levitaj alten, forflosante orienten; sed ankoraŭ nun griza lumo atingis la sensukajn kampojn de Gorgoroto. Tie fumoj serpentumis sur la tero kaj embuskis en kavaĵoj, kaj fetoroj likiĝis el fendetoj en la tero.

Ankoraŭ malproksime, post minimume kvardek mejloj, ili vidis la Monton de Sorto, kies subo estis starigita en cindra ruino, kies konusego leviĝis je granda alto, kie ĝia fetora pinto estis volvita en nuboj. Ĝiaj fajroj jam malardiĝis, kaj ĝi staris subbrule dormanta, tiel minaca kaj danĝera kiel dormanta besto. Malantaŭ ĝi pendis malhela ombro, misaŭgura kiel tondronubo, la vualo de Baraduro, kiu naskiĝis malproksime sur longa elstaraĵo de la Cindraj Montoj el la nordo elmetita. La Malhela Potenco profunde meditadis, kaj la Okulo turniĝis internen, pripensante informojn duboplenajn kaj danĝerajn: brilan glavon kaj severan reĝecan vizaĝon ĝi vidis, kaj dum kelka tempo ĝi malmulte atentis ion alian; kaj ĝia tuta granda fortikaĵo, pordon post pordo, estis volvita en miskova sombro.

Frodo kaj Sam elrigardis kun miksitaj abomeno kaj miro al tiu malaminda lando. Inter ili kaj la fumanta monto, kaj ĉirkaŭ ĝi norde kaj sude, ĉio ŝajnis ruina kaj morta, dezerto bruligita kaj sufokita. Ili scivolis kiel la mastro de tiu regno vivtenis kaj nutris siajn sklavojn kaj siajn armeojn. Tamen armeojn li havis. Tra ilia tuta vidkampo, laŭ la subaĵo de Morgajo kaj fore suden, troviĝis bivakoj, iuj tende, iuj urbetece ordigitaj. Unu el la plej grandaj el ili troviĝis rekte sub ili. Apenaŭ mejlon for sur la ebenaĵo ĝi amasiĝis kiel ia nestego insekta, kun rektaj mornaj stratoj da kabanoj kaj longaj malaltaj senkoloraj konstruaĵoj. Ĉirkaŭ ĝi la tero estis svarma je personoj irantaj tien-reen; larĝa vojo etendiĝis de ĝi sud-orienten por aliĝi al la Morgula Vojo, kaj sur ĝi multaj linioj da etaj nigraj figuroj rapidadis.

— Al mi ne plaĉas la aspekto de la aferoj entute, — diris Sam. — Sufiĉe senespera mi nomas tion, krom ke kie troviĝas tiom da personoj, tie devas esti putoj aŭ akvo, por ne paroli pri manĝaĵoj. Kaj tiuj estas homoj, ne orkoj, aŭ miaj okuloj misfunkcias.

Nek li nek Frodo sciis pri la grandaj sklavkulturitaj kampoj forsude en tiu vasta regno, post la fumoj de la Monto apud la malhelaj tristaj akvoj de lago Nurneno, nek pri la grandaj vojoj, kiuj etendiĝis orienten kaj suden al landoj tributaj, el kiuj la soldatoj de la Turego venigis longajn furgonarojn da varoj kaj rabaĵo kaj novaj sklavoj. Ĉi tie en la nordaj regionoj estis la minejoj kaj forĝejoj, kaj la kolektiĝoj por milito longe planita; kaj ĉi tie la Malhela Potenco, movante siajn armeojn, kvazaŭ ŝakpecojn sur tabulo, kunigis ilin. Ĝiaj unuaj movoj, la unuaj provoj de ĝia forto, estis haltigitaj sur ĝia okcidenta linio, sude kaj norde. Provizore ĝi reprenis ilin, kaj antaŭenigis novajn fortojn, amasigante ilin ĉirkaŭ Cirito Gorgor por venĝa bato. Kaj se ĝi intencis ankaŭ defendi la Monton kontraŭ ĉiu alproksimiĝo, ĝi apenaŭ povis fari pli ol ĝi ja faris.

— Nu! — Sam daŭrigis. — Kion ajn ili havas manĝeblan kaj trinkeblan,

ni ne povas akiri ĝin. Troviĝas neniu vojo suben videbla al mi. Kaj ni ne povus transiri tiun tutan apertan regionon plenplenan de malamikoj, eĉ se ni sukcesus subiri.

— Tamen ni devos provi, — diris Frodo. — Ĝi ne estas pli malbona ol mi antaŭvidis. Mi neniam esperis transiri. Ankaŭ nun mi ne vidas tian esperon. Sed mi devas ankoraŭ fari mian plejeblon. Aktuale tio signifas eviti kiel eble plej longe kaptiĝon. Do ni devos ankoraŭ iri norden, laŭ mia opinio, kaj vidi kiel estas, kie la aperta ebenaĵo estas pli mallarĝa.

— Mi antaŭvidas, kia ĝi estos, — diris Sam. — Kie ĝi estas pli mallarĝa la orkoj kaj homoj nur pli dense kunpremiĝos. Vi vidos, sinjoro Frodo.

— Verŝajne ni tion vidos, se ni entute atingos tiel malproksimen, — diris Frodo kaj forturnis sin.

Ili baldaŭ konstatis, ke estis neeble trovi vojon laŭ la kresto de Morgajo, aŭ ie ajn ĉe ĝiaj pli malaltaj niveloj, ĉar ili estis senpadaj kaj trastrekitaj je profundaj ravinetoj. Fine ili estis devigitaj retroiri tra la ravino, kiun ili jam grimpis, kaj serĉi vojon laŭlonge de la valo. Malfacilis la irado, ĉar ili ne riskis transiri al la pado ĉe la okcidenta flanko. Post mejlo aŭ eble pli ili vidis, kaŭrantan en kavo funde de la klifo, la orkan fortikaĵon, kies proksimecon ili supozis: muron kaj grapolon da ŝtonaj kabanoj starigitaj ĉirkaŭ la malhela aperturo de kaverno. Neniu moviĝo videblis, sed la hobitoj ŝtele pasis ĝin singarde, laŭeble restante en la dornarbustoj, kiuj kreskis dense tiuloke je ambaŭ flankoj de la malnova akvofluejo.

Post du aŭ tri mejloj la orka fortikaĵo iĝis nevidebla malantaŭ ili; sed apenaŭ ili komencis spiri denove pli libere, ili aŭdis raŭkajn kaj laŭtajn orkajn voĉojn. Ili rapide nevidebligis sin malantaŭ bruna kaj naneca arbusto. La voĉoj proksimiĝis. Baldaŭ vidiĝis du orkoj. Unu estis vestita per ĉifita brunaĵo kaj estis armita per pafarko el korno; li estis eta, nigrahaŭta, kun larĝaj snufaj naztruoj: evidente iaspeca spuristo. La alia estis granda batal-orko, kiel tiuj en la trupo de Ŝagrato, portanta la insignon de l' Okulo. Ankaŭ li havis pafarkon surdorse kaj portis mallongan larĝklingan lancon. Kiel kutime ili kverelis, kaj estante malsamspecaj ili uzis la Komunan Lingvon laŭ sia maniero.

Apenaŭ dudek paŝojn de kie sin kaŝis la hobitoj, la eta orko haltis.

— Ne! — li murmuregis. — Mi iros hejmen. — Li fingromontris trans la valon al la orka fortikaĵo. — Ne valoras trivi mian nazon plu kontraŭ ŝtonoj. Nenia postsigno restas, mi diras. Mi perdis la spurodoron pro tio, ke mi cedis al vi. Ĝi supreniris sur la montaron, ne tra la valo, mi insistas.

— Ne multe utilas vi snufistetoj, ĉu? — diris la granda orko. — Laŭ mi, okuloj pli utilas ol viaj mukaj nazoj.

— Do kion vi vidis per ili? — murmuregis la alia. — Aĉ! Vi eĉ ne scias,

kion vi serĉas.

— Kiu kulpas pri tio? — diris la soldato. — Ne mi. Tio devenas de la ĉefoj. Komence ili diras, ke temas pri granda elfo en hela armaĵo, poste ĝi estas speco de eta nanhomo, poste devas esti hordo da uruk-hajaj ribelintoj; aŭ eble temas pri ĉiuj kune.

— Pa! — diris la spuristo. — Ili perdis la prudenton, jen la klarigo. Kaj iuj el la estroj perdos ankaŭ la haŭtojn, mi konjektas, se veras tio, kion mi aŭdas: la turego atakita kaj tiel plu, kaj centoj el viaj knaboj mortigitaj, kaj kaptito eskapinta. Se tiel kondutas vi, batalantoj, ne mirindas, ke malbonas la novaĵoj pri la bataloj.

— Kiu diras, ke ekzistas malbonaj novaĵoj? — kriis la soldato.

— Pa! Kiu diras, ke ne?

— Tio estas sakrinda ribela parolo, kaj mi trapikos vin, se vi ne fermos la faŭkon, ĉu komprenite?

— Bone, bone! — diris la spuristo. — Mi nenion plu diros kaj daŭre pensados. Sed kial enmiksiĝas la nigra kaŝirulo? Tiu glutegulo kun la manoj oscilantaj?

— Mi ne scias. Nenial, eble. Sed li celas nenion bonan, ĉirkaŭnazumante, mi vetas. Li estu malbenita! Tuj post kiam li evitis nin kaj forkuris, venis informo, ke li estas necesa vivanta, urĝe necesa.

— Nu, mi esperas, ke oni kaptos lin kaj suferigos lin, — graŭlis la spuristo. — Li fuŝis la spurodoron tie malantaŭe, ŝtelinte tiun forĵetitan maŝkirason, kiun li trovis, kaj ĉirkaŭpadelante tra la tuta loko antaŭ ol mi povis atingi la lokon.

— Ĝi ĉiuokaze savis lian vivon, — diris la soldato. — Vidu, antaŭ ol mi sciis, ke li estas serĉato, mi pafis lin nete-netege, je kvindek paŝoj ĝuste en la dorson, sed li plu kuris.

— Pa! Vi maltrafis lin. Komence vi pafas sencele, poste vi kuras tro malrapide, kaj fine vi alvokas la kompatindajn spuristojn. Al mi jam sufiĉas pri vi. — La spuristo forpaŝegis.

— Revenu, — kriis la soldato, — aŭ mi raportos pri vi!

— Al kiu? Ne al via ŝatata Ŝagrato. Li ne plu estos trupestro.

— Mi donos viajn nomon kaj numeron al la nazguloj, — diris la soldato sible mallaŭtigante sian voĉon. — Unu el *ili* komandas nun ĉe la turego.

La alia haltis, kaj lia voĉo estis plenplena de timo kaj kolerego.

— Vi malbeninda denuncema etŝtelisto! — li kriegis. — Vi ne kapablas je via tasko, kaj vi eĉ ne povas lojali al la propra popolo. Iru al viaj fiaj kriĉistoj, kaj ili glaciigu al vi la karnon! Se la malamikoj ne trovis ilin anticipe. Oni mortigis Numeron Unu, mi aŭdis, kaj mi esperas, ke tio estas vera’.

La granda orko, lanc-en-mane, saltis post lin. Sed la spuristo, saltinte post ŝtonegon, pafis sagon en lian okulon, dum li alkuris, kaj li falis bruege. La alia forkuris tra la valo kaj nialaperis.

Kelkan tempon la hobitoj sidis silente. Finfine Sam ekmoviĝis.

— Nu, mi nomas tion nete netega, — li diris, — se tiu ĉi afabla amikiĝemo disvastiĝus tra Mordoro, duono de niaj problemoj estus solvita.

— Kviete, Sam, — Frodo flustris. — Eble aliaj proksimas. Ni evidente tre bonŝance eskapis, kaj la persekuto pli arde spuris nin, ol ni supozis. Sed tia ja estas la spirito de Mordoro, Sam; kaj ĝi disvastiĝis al ĉiuj ties popoloj. Orkoj ĉiam kondutis tiel, aŭ tion diras la rakontoj, kiam ili estas solaj. Sed ne eblas ĉerpi multe da espero el tio. Ili malamas nin multe pli, komplete kaj la tutan tempon. Se tiuj du vidus nin, ili ĉesigus sian kverelon, ĝis ni estus mortaj.

Sekvis plia longa silento. Sam denove rompis ĝin, sed ĉi-foje flustre:

— Ĉu vi aŭdis, kion ili diris pri *tiu glutegulo*, sinjoro Frodo? Mi ja diris al vi, ke Golumo ankoraŭ ne mortis, ĉu ne?

— Jes, mi memoras. Kaj mi scivolis, kiel vi sciis tion. Nu, sufiĉe! Mi opinias, ke ni prefere ne formoviĝu de ĉi tie, ĝis iĝos tute mallume. Diru al mi, kiel vi scias, kaj ĉion, kio okazis. Se tion vi kapablas kviete.

— Mi provos, — diris Sam, — sed kiam mi pensas pri tiu fetorulo, mi tiom varmiĝas, ke mi volas kriegi.

Tie la hobitoj sidis sub ŝirmo de la dornarbusto, dum la morna lumo de Mordoro velkis malrapide al profunda kaj senstela nokto; kaj Sam diris en la orelon de Frodo ĉion, por kio li povis trovi vortojn pri la perfidema atako de Golumo, la hororo de Ŝeloba, kaj liaj propraj aventuroj kun la orkoj. Kiam li finis, Frodo diris nenion, sed kaptis la manon de Sam kaj premis ĝin. Finfine li ekmoviĝis.

— Nu, supozeble ni devas ekpluiri, — li diris. — Mi scivolas, kiom longe daŭros antaŭ ol ni efektive estos kaptitaj, kaj la tuta penado kaj la ŝtelirado estos finitaj, kaj vane. — Li stariĝis. — Estas mallume, kaj ni ne povas utiligi la vitron de la Damo. Gardu ĝin sekure por mi, Sam. Nun mi ne povas reteni ĝin krom en mia mano, kaj mi bezonos ambaŭ manojn en la blinda nokto. Sed Pikilon mi donas al vi. Mi havas orkan klingon, sed mi ne opinias, ke mia rolo iam denove postulos bati glave.

Estis malfacile kaj danĝere moviĝi nokte en la senpada regiono; sed malrapide kaj tre stumble la du hobitoj penis norden horon post horo laŭ la orienta rando de l' ŝtonoza valo. Kiam griza lumo revenis rampe super la okcidentaj altaĵoj, longe post kiam la tago komenciĝis en la transaj landoj, ili kaŝiĝis denove kaj dormis iom laŭvice. Dum siaj maldormaj horoj Sam okupiĝis pensante pri nutraĵoj. Finfine, kiam Frodo vekis sin kaj parolis pri

manĝado kaj preparado por ankoraŭ unu plia penado, li starigis la demandon, kiu plej perturbis lin.

— Pardonpete, sinjoro Frodo, — li diris, — sed ĉu vi entute scias, kia distanco estas ankoraŭ trairota?

— Ne, tute ne klare, Sam. En Rivendelo antaŭ ol mi ekvojaĝis, oni montris al mi mapon de Mordoro, kiu estis farita antaŭ ol la Malamiko revenis ĉi tien; sed nur malprecize mi memoras ĝin. Plej klare mi memoras, ke en la nordo estis loko, kie la okcidenta montaro kaj la norda montaro etendas membrojn, kiuj preskaŭ renkontiĝas. Tio certe estas dudek leŭgojn minimume de la ponto retro apud la turego. Tio eble estus bona loko transiri. Sed kompreneble, se ni alvenus tien, ni troviĝos pli distance ol antaŭe de la Monto, sesdek mejlojn de ĝi, mi opinias. Mi konjektas, ke ni jam iris ĉirkaŭ dek du mejlojn norden de la ponto. Eĉ se ĉio iros glate, mi apenaŭ atingos la Monton post unu semajno. Mi timas, Sam, ke la ŝarĝo fariĝos ege peza, kaj mi iros des pli malrapide ju pli ni proksimiĝos.

Sam ĝemspiris.

— Ĝuste tion mi timis, — li diris. — Nu, se nenion diri pri akvo, ni devos malpli manĝi, sinjoro Frodo, aŭ alternative marŝi pli rapide, almenaŭ dum ni estos en tiu ĉi valo. Ankoraŭ unu mordo kaj finiĝos la tuta manĝaĵo krom la elfa vojpano.

— Mi klopodos iri iom pli rapide, Sam, — diris Frodo, profunde enspirinte. — Ek do! Ni rekomencu la marŝadon!

Ne tute mallumiĝis denove. Ili plandis plu, antaŭen en la nokton. La horoj pasis per laca stumbla progreso kun malmultaj mallongaj haltoj. Je la unua averto pri la griza lumo sub la rando de la ombra baldakeno ili sin kaŝis denove en malhela kavo sur superpendanta ŝtonego.

Malrapide plifortiĝis la lumo, ĝis ĝi estis pli klara ol ĝi estis ĝis tiam. Forta vento el la okcidento nun forpelis la fumojn de Mordoro el la supraj aeroj. Post nelonge la hobitoj povis vidi la formon de la tereno je kelkaj mejloj ĉirkaŭe. La kavo inter la montoj kaj Morgajo grade malpliiĝis dum ĝi supreniris, kaj la interna firsto estis jam ne pli ol breto sur la krutaj facoj de Efelo Duad; sed oriente ĝi descendis tiel apike, kiel antaŭe, suben en Gorgoroton. Antaŭe la akvofluejo finiĝis per rompitaj ŝtupoj da roko; ĉar alsaltis el la ĉefa montaro alta senherba elstaraĵo, nurece ŝoviĝanta orienten. Renkonte al ĝi etendiĝis el la griza kaj nebuleca norda montaro de Eredo Litui longa elstara brakaĵo; kaj inter la ekstremoj estis mallarĝa breĉo: Karaĥo Angren, la Isenbuŝo, post kiu kuŝis la profunda valo Uduno. En tiu valo malantaŭ Moranono estis tuneloj kaj profundaj armilejoj, kiujn la servistoj de Mordoro faris por defendo de la Nigra Pordego de sia lando. Kaj tie nun ilia mastro amasigis haste grandajn armeojn por renkonti la

sturmadon de la komandantoj de la okcidento. Sur la elpuŝitaj terlangoj estis konstruitaj fortikaĵoj kaj turoj, kaj flamis gardfajroj; kaj tra la tuta breĉo estis starigita grunda muro, kaj fosita estis profunda fosaĵo, kiu estis transirebla nur pere de sola ponto.

Kelkajn mejlojn norde, altsupre en la angulo, kie la okcidenta terlango branĉiĝis for de la ĉefa montaro, staris la malnova kastelo Dartango, nun unu el la multaj orkaj fortikaĵoj, kiuj amasiĝis ĉirkaŭ la valo de Uduno. Vojo, jam videbla en la plifortiĝanta lumo, serpentumis suben de ĝi, ĝis nur unu-du mejloj de kie kuŝis la hobitoj ĝi turniĝis orienten kaj laŭiris breton tranĉitan flanke de la terlango, kaj tiel suben al la ebenaĵo, kaj pluen al Isenbuŝo.

Al la elrigardantaj hobitoj ŝajnis, ke ilia tuta vojaĝo norden estis senfrukta. La ebenaĵo dekstre estis malklara kaj fumeca, kaj tie ili povis vidi nek bivakojn nek moviĝantajn soldatojn; sed tiu tuta regiono estis observata de la fortikaĵoj de Karaĥo Angren.

— Ni alvenis sakvojon, Sam, — diris Frodo. — Se ni pluiros, ni nur atingos tiun orkan turon, sed la sola irota vojo estas tiu, kiu descendas de ĝi, krom se ni retroiros. Ni povas nek grimpi okcidenten, nek descendi orienten.

— Do necesas laŭiri la vojon, sinjoro Frodo, — diris Sam. — Ni devas sekvi ĝin kaj fidi nian bonŝancon, se bonŝanco ekzistas en Mordoro. Cedi nin utilas same kiel ĉirkaŭvagadi plu, aŭ provi retroiri. Nia nutraĵo ne sufiĉus. Ni devas alkuradi!

— Bone, Sam, — diris Frodo. — Konduku min! Tiel longe kiel restas al vi espero. Foriĝis la mia. Sed kuri mi ne kapablas, Sam. Mi simple plandados malantaŭ vi.

— Antaŭ komenci pluan plandadon, vi bezonas dormon kaj manĝaĵon, sinjoro Frodo. Venu preni da ili tiom, kiom vi povas akiri!

Li donis al Frodo akvon kaj aldonan oblaton da vojpano, kaj el sia mantelo li faris kusenon por la kapo de sia mastro. Frodo estis tro laca por debati la aferon, kaj Sam ne sciigis al li, ke li glutis la lastan guton de ilia akvo kaj manĝis la panporcion de Sam kune kun la propra. Kiam Frodo jam dormis, Sam kliniĝis al li kaj aŭskultis lian spiradon kaj observis lian vizaĝon. Tiu estis faltita kaj malgrasa, kaj tamen dumdorme ĝi aspektis kontenta kaj sentima.

— Nu, jen komenciĝas, mastro! — Sam murmuris al si. — Mi devos por kelka tempo lasi vin kaj fidi la bonŝancon. Akvon ni devos havi, aŭ ni ne sukcesos pluiri.

Sam ŝteliris eksteren, kaj rapidante de ŝtono al ŝtono laŭ singardemo pli ol hobita, li subiris al la akvofluejo, kaj poste laŭiris ĝin kelkan tempon,

dum ĝi supreniris norden, ĝis li venis al rokaj ŝtupoj, kie antaŭlonge sendube ĝia fonto suben impetis kiel akvofaleto. Ĉio nun ŝajnis seka kaj silenta; sed rifuzante malesperi Sam kliniĝis kaj aŭskultis, kaj ĝojigate ekaŭdis sonon de fluetado. Grimpinte kelkajn ŝtupojn supren li trovis etan rojon da malhela akvo, kiu eliris el la montoflanko kaj plenigis malgrandan flakon, el kiu ĝi denove verŝiĝis kaj poste malaperis sub la malfekundajn ŝtonojn.

Sam gustumis la akvon, kaj ĝi ŝajnis sufiĉe bona. Poste li profunde trinkis, replenigis la botelon, kaj turniĝis por reiri. Tiumomente li ekvidis nigran figuron aŭ ombron moviĝanta inter la rokoj fore apud la kaŝejo de Frodo. Englutinte krion, li desaltis de la fonto kaj kuris, saltante de ŝtono al ŝtono. Tiu estis singardema kreaĵo, malfacile videbla, sed Sam malmulte dubis pri ĝi: li sopiris mankapti ĝian kolon. Sed tiu aŭdis lian proksimiĝon kaj kviete forglitis. Al Sam ŝajnis, ke li laste ekvidas tiun retrogvatanta trans la rando de la orienta krutegaĵo, antaŭ ol ĝi subenŝovis la kapon kaj malaperis.

— Nu, la bonŝanco ne perfidis min, — murmuris Sam, — sed tio estis kriza momento! Ĉu ne sufiĉas havi orkojn pomile sen ke tiu fetora fiulo venu nazumante? Mi volus, ke li estu pafita!

Li sidiĝis apud Frodo kaj ne vekis lin; sed li ne riskis mem endormiĝi. Finfine, kiam li sentis fermiĝi la okulojn kaj sciis, ke lia klopodo resti maldorma ne daŭros plu longe, li vekis Frodon milde.

— Tiu Golumo denove proksimas, mi timas, sinjoro Frodo, — li diris. — Ĉiuokaze, se estis ne li, li ekzistas duope. Mi foriris por trovi iom da akvo kaj rimarkis lin ĉirkaŭnazumanta ĝuste kiam mi ekrevenis. Mi opinias, ke ne estas sendanĝere por ni dormi samtempe, kaj pardonpete, sed mi ne povos multe pli longe teni apertaj la palpebrojn.

— Estu benata, Sam! — diris Frodo. — Kuŝiĝu kaj akceptu vian vicon! Sed mi prefere havus Golumon ol orkojn. Li ĉiuokaze ne perfidos nin al ili — kondiĉe ke li ne estu mem kaptita.

— Sed li eble faros iom da rabado kaj murdo proprainiciate, — graŭlis Sam. — Tenu la okulojn malfermitaj, sinjoro Frodo! Jen botelo plena da akvo. Trinku profunde. Ni povos replenigi ĝin, kiam ni pluiros. — Dirinte tion Sam plonĝis en dormadon.

La lumo denove ekvelkis, kiam li vekiĝis. Frodo sidis apogite al la malantaŭa roko, sed li endormiĝis. La botelo estis malplena. Estis neniu indiko pri Golumo.

La Mordora mallumo revenis, kaj la gardofajroj sur la altaĵoj brulis akre kaj ruĝe, kiam la hobitoj ekiris denove al la plej danĝera stadio de sia vojaĝo. Ili iris unue al la fonteto, kaj poste grimpis singarde supren al la

vojo ĉe tiu loko, kie ĝi turniĝis orienten al Isenbuŝo dudek mejlojn for. Ĝi ne estis vojo larĝa, kaj ĝi havis nek muron, nek parapeton ĉe la rando, kaj dum ĝi progresis, la apika krutaĵo ĉe ĝia rando pli kaj pli profundiĝis. La hobitoj povis aŭdi neniujn moviĝojn, kaj aŭskultinte dum iom da tempo, ili ekiris ordmarŝe orienten.

Post ĉirkaŭ dek du mejloj ili haltis. Iomete pli frue la vojo kurbiĝis certagrade norden, kaj tiu etendiĝo kiun ili trapasis, jam estis barita al la vido. Tio pruviĝis katastrofa. Ili ripozis kelkajn minutojn kaj poste pluiris; sed post nur kelkaj paŝoj ili subite en la nokta trankvilo aŭdis la sonon, kiun la tutan tempon ili sekrete antaŭtimis: la bruon de piedoj marŝantaj. Tio estis ankoraŭ iom malantaŭ ili, sed retrorigardante ili vidis la ekbrilon de torĉoj venantaj ĉirkaŭ la kurbiĝon malpli ol unu mejlon for, kaj tiuj moviĝis rapide: tro rapide, por ke Frodo eskapu fuĝante laŭ la vojo antaŭe.

— Tion mi timis, Sam, — diris Frodo. — Mi fidis nian bonŝancon, kaj ĝi perfidis nin. Ni estas enŝlositaj. — Li rigardis agitite supren al la brovumanta muro, kie la vojkonstruintoj en pratempo krutigis la rokaĵon je multaj klaftoj super iliaj kapoj. Li kuris al la alia flanko kaj transrigardis la randon en malhelan mornoputon.

— Ni estas finfine enŝlositaj! — li diris kaj sinkis teren sub la rokmuro kaj klinis sian kapon.

— Ŝajnas tiel, — diris Sam. — Nu, eblas nur atendi la okazaĵon. — Kaj tion dirinte li sidiĝis apud Frodo sub la ombro de la klifo.

Ne necesis longe atendi. La orkoj vojaĝis hastpaŝe. Tiuj en la avangardo portis torĉojn. Ili venis antaŭen, ruĝaj flamoj en la mallumo, rapide plifortiĝantaj. Nun ankaŭ Sam klinis la kapon, esperante, ke tiel kaŝiĝos lia vizaĝo, kiam la torĉoj atingos ilin; kaj li metis iliajn ŝildojn antaŭ la genuojn por kaŝi iliajn piedojn.

“Se nur ili urĝos kaj lasos duopon da lacaj soldatoj en paco kaj pluiros”, — li pensis.

Kaj ŝajnis, ke ili tion faros. La avangardaj orkoj venis saltpaŝe, anhelante, klinante siajn kapojn. Ili estis hordo de la specoj malgrandaj malvolonte pelataj al la milito de sia Malhela Mastro; interesis ilin nur kompletigo de la marŝado kaj evito de vipo. Apud ili, kurante tien-reen laŭ la linio, iris du el la grandaj sovaĝaj *urukoj*, klakigante vipojn kaj kriante. Spaliro post spaliro pasis, kaj la riveliga torĉlumo estis jam iom antaŭe. Sam retenis sian spiron. Jam pli ol duono de la trupo preterpasis. Tiam subite unu el la sklavpelantoj rimarkis la du figurojn apud la vojo. Li frapetis per vipo al ili kaj kriis:

— Ha vi! Stariĝu!

Ili ne respondis, kaj per krio li haltigis la trupon.

— Ek al, limakoj! Ne estas tempo por sidado. — Li faris unu paŝon al ili, kaj eĉ en la malhelo li rekonis la insignojn sur iliaj ŝildoj. — Dizertantoj, ĉu? — li mordminacis. — Aŭ pripensas tion? Via tuta popolo devis esti en Uduno jam antaŭhieraŭ vespere. Tion vi scias. Stariĝu kaj enviciĝu, aŭ mi notos viajn numerojn kaj raportos pri vi.

Ili barakte stariĝis, kaj ankoraŭ kliniĝante, lamante kiel piede lacaj soldatoj, ili treniĝis direkte al la spalirofino.

— Ne, ne lastvice! — la sklavpelanto kriis. — Antaŭen je tri vicoj. Kaj restu tie, aŭ vi spertos, kiam mi revenos laŭ la linio! — Li igis sian longan vipvoston klaki super iliaj kapoj; poste per alia klako kaj krio li reirigis la trupon je rapida troto.

Estis sufiĉe malfacile por kompatinda Sam, kiu estis laca; sed por Frodo tio estis turmento, kaj baldaŭ koŝmaro. Li kunpremis siajn dentojn kaj klopodis malebligi pensadon en sia menso, kaj li baraktis antaŭen. La fetoro de la ŝvitantaj orkoj ĉirkaŭ li estis sufoka, kaj li komencis anheli soifege. Daŭre ili pluiris, kaj li direktis sian tutan volpovon al spirado kaj movo de la kruroj; kaj tamen al kiu fia celo li penegas kaj suferas, li ne riskis pripensi. Elviciĝo nevidata ne espereblis. De tempo al tempo la orka pelanto revenis kaj mokis ilin.

— Jen do! — li ridis, frapetante iliajn krurojn. — Kie vipo estas, volo estas, limakoj miaj. Ne falu! Mi havigus al vi belan freŝigilon nun, sed vi ricevos tiom da vipado kiom toleros viaj haŭtoj, kiam vi alvenos malfrue al via bivako. Bonefikos al vi. Ĉu vi ne scias, ke ni jam militas?

Ili jam iris kelkajn mejlojn, kaj la vojo finfine direktiĝis suben laŭ longa deklivo al la ebenaĵo, kiam la forto de Frodo komencis elĉerpiĝi kaj lia volpovo ŝanceliĝis. Li skuiĝis kaj stumblis. Sam streĉe provis helpi kaj subteni lin, kvankam li sentis, ke li mem apenaŭ plu eltenos. Li sciis, ke la fino venos preskaŭ tuj: lia mastro svenos aŭ falos, kaj ĉio estos malkovrita, kaj iliaj teruraj penoj estos vanaj. “Mi ĉiuokaze finos pri tiu sklavpela ulaĉo”, — li pensis.

Tiam ĝuste, kiam li elmetis sian manon al la tenilo de sia glavo, venis neatendita faciligo. Nun ili estis sur la ebenaĵo proksimiĝante al la enirejo de Uduno. Iom antaŭ ĝi, antaŭ la pordo ĉe la pontekstremo, la vojo el la okcidento aliĝis al aliaj venantaj el la sudo kaj el Baraduro. Laŭ ĉiuj vojoj soldatoj moviĝis; ĉar la komandantoj de l’ okcidento marŝis antaŭen, kaj la Malhela Mastro ekspedis norden siajn trupojn, Do hazarde pluraj trupoj venis samtempe al la vojrenkontiĝo, en la mallumo ekster la lumo de la gardfajroj sur la muro. Tuj okazis multe da interpuŝiĝo kaj sakrado, dum ĉiu trupo klopodis veni la unua al la pordo kaj la fino de sia marŝado. Kvankam pelantoj kriis kaj vipadis, interbatiĝoj ekestis, kaj kelkaj glavoj estis

elingigitaj. Trupo de pezarmitaj *urukoj* el Baraduro impetis en la Dartangan trupon kaj kaŭzis konfuzon.

Kvankam li estis sensobtuzigita pro doloro kaj laceco, Sam vigliĝis, trafis rapide la eblecon, kaj ĵetis sin teren, subentrenante samtempe Frodon. Orkoj stumblis sur ili, mordminace kaj sakre. Malrapide per la manoj kaj genuoj la hobitoj forrampis el la konfuziĝo, ĝis fine ili nerimarkite transfalis la foran randon de la vojo. Tiu havis altan trotuarrandon per kiu trupestroj povis sin gvidi en nigra nokto aŭ nebulo, kaj ĝi estis amasigita je kelkaj futoj super la nivelo de la aperta tereno.

Ili kuŝis senmove dum kelka tempo. Estis tro mallume por serĉi ŝirmejon, se entute tia estis trovebla; sed Sam opiniis, ke ili devus minimume pli malproksimiĝi de la ŝoseoj kaj de la torĉluma atingo.

— Venu, sinjoro Frodo! — li flustris. — Unu plua rampo kaj poste vi povos kuŝi senmove.

Per lasta senespera peno Frodo levis sin per la brakoj kaj baraktis pluen je eble dudek paŝoj. Tiam li falegis en malprofundan kavaĵon, kiu neatendite malfermiĝis antaŭ ili, kaj tie li kuŝis kvazaŭ mortinto.

3

La Monto de Sorto

Sam metis sian ĉifitan orkan mantelon sub la kapon de sia mastro kaj kovris sin kaj lin per la griza robo de Lorieno; kaj kiam li faris tion, liaj pensoj direktiĝis al tiu bela lando kaj al la elfoj, kaj li esperis, ke la tolo, kiun ili teksis, eble havos iom da kapablo teni ilin kaŝitaj preterespere en tiu sovaĝejo de timo. Li aŭdis la interbatiĝon kaj kriojn formorti, kiam la trupoj trapasis al Isenbuŝo. Ŝajnis, ke dum la konfuzo kaj la intermiksiĝo de multaj trupoj diversspecaj ilia foresto ne rimarkiĝis, ĉiuokaze ne ĝis tiam.

Sam sorbetis gluton da akvo, sed insistis, ke Frodo trinku, kaj kiam lia mastro refortiĝis iomete, li donis al li tutan oblaton da valorega vojpano kaj devigis lin manĝi ĝin. Poste, tro elĉerpitaj por sperti eĉ iom da timo, ili etendis sin kuŝe. Ili dormis iom en maltrankvilaj periodetoj; ĉar ilia ŝvito frostiĝis sur ili, kaj la malmolaj ŝtonoj mordis ilin, kaj ili frostotremetis. El la nordo tra la Nigra Pordego kaj Cirito Gorgor fluis flustre laŭ la tero maldensa malvarma aero.

Matene venis denove lumo griza, ĉar en la altaj regionoj ankoraŭ blovis la okcidenta vento, sed sube sur la ŝtonoj malantaŭ la bariloj de la Nigra Lando la aero ŝajnis preskaŭ mortinta, malvarmega tamen sufoka. Sam supren rigardis el la kavo. La tero ĉie ĉirkaŭe estis morna, plata kaj grizbruna. Sur la proksimaj vojoj nenio nun moviĝis; sed Sam timis pri la vaĉaj okuloj sur la muro de Isenbuŝo, je ne pli ol mejlokono norde. Sud-oriente, malproksima kiel malhela elstara ombro, baŭmis la Monto. Fumoj verŝiĝis el ĝi, kaj dum tiuj kiuj leviĝis en la supran aeron forflosis orienten, grandaj ruliĝantaj nuboj descendis sur ĝiaj flankoj kaj disvastiĝis tra la lando. Kelkajn mejlojn nord-oriente la subaj montetoj de la Cindraj Montoj staris kiel sombraj grizaj fantomoj, malantaŭ kiuj leviĝis la nebulecaj nordaj altaĵoj kvazaŭ linio da fora nubo apenaŭ pli malhela ol la malaltiĝanta ĉielo.

Sam provis diveni la distancojn kaj decidi kiun vojon ili devus sekvi.

— Tio ŝajnas minimume kvindek mejloj, — li murmuris malfeliĉe, gapante al la minaca monto, — kaj tio daŭros tutan semajnon, ne unu tagon, pro la sanstato de sinjoro Frodo.

Li skuis la kapon, kaj dum li analizis la aferon, kreskis en lia menso nova malhela penso. Neniam tre longe espero mortis en lia brava koro, kaj ĉiam ĝis nun li konservis iom da pensado pri la revena vojo. Sed la malagrabla vero trafis lin finfine: plej bonokaze ilia provianto subtenos ilin

ĝis la celo; kaj post kompletigo de la tasko ili finiĝos, solaj, sendomaj, sennutraĵaj meze de terura dezerto. Reveno ne povos esti.

“Do tio estis la tasko, kiun mi sentis farota, kiam mi komencis, — pensis Sam: — helpi sinjoron Frodo ĝis la lasta paŝo kaj poste morti kun li, ĉu? Nu, se tio estas la tasko, mi devas plenumi ĝin. Sed mi tre volonte volus vidi denove Apudakvon, kaj Rozinjon Kotono kaj ties fratojn, kaj la Avulon kaj Kalendulon kaj tiel plu. Ial mi ne povas supozi, ke Gandalfo sendus sinjoron Frodo plenumi tiun ĉi komision, se ne ekzistus ajna espero pri lia iama reveno. Ĉio misiris, kiam li falis en Morio. Se nur tio ne okazus. Li estus ion farinta”.

Sed ĝuste dum la espero mortis en Sam, aŭ ŝajnis morti, tio fariĝis nova forteco. La sendistinga hobita vizaĝo de Sam iĝis severa, preskaŭ minaca, dum la volpovo en li hardiĝis, kaj li sentis en ĉiuj membroj vibron, kvazaŭ li fariĝus ŝtona kaj ŝtala kreaĵo, kiun nek malespero nek lacego de senfinaj dezertaj mejloj kapablus subpremi.

Kun nova sento de respondeco li revenigis sian rigardon al la proksima tero, studante la postan moviĝon. Dum la lumo iom plifortiĝis, li vidis surprizate, ke tio, kio ŝajnis defore larĝaj kaj sendistingaj platejoj, estas fakte tute rompitaj kaj malordigitaj. Efektive, la tuta supraĵo de la Gorgorotaj ebenaĵoj estis tramarkita per truegoj, kvazaŭ, dum ĝi ankoraŭ estis dezerto da mola koto, ĝin trafis pluvego da sagoj kaj enormaj ĵetŝtonoj. La plej grandaj el tiuj truegoj estis randitaj per krestoj el rompitaj rokaĵoj, kaj larĝaj fendaĵoj etendiĝis de ili ĉiudirekten. Ĝi estis tereno, sur kiu estus eble rampi de kaŝejo al kaŝejo, nevidate de ĉiuj okuloj krom la plej atentaj: eble almenaŭ por iu kiu estis forta kaj al kiu ne necesis hasto. Por la malsataj kaj la elĉerpitaj, kiuj devis iri longe antaŭ ol forvelkus la vivo, ĝi aspektis fie.

Pripensante ĉion ĉi, Sam reiris al sia mastro. Ne necesis veki lin. Frodo kuŝis surdorse kun la malfermitaj okuloj, gapante al la nuboplena ĉielo.

— Nu, sinjoro Frodo, — diris Sam, — mi iom ĉirkaŭrigardis kaj pensadis iom. Nenio troviĝas sur la vojoj, kaj prefere ni foriru, dum tio eblas. Ĉu vi kapablas tion?

— Mi kapablas, — diris Frodo. — Mi devas.

Ankoraŭ unufoje ili ekiris, rampante de kavo al kavo, saltante malantaŭ la malmulto da ŝirmaĵo, kiun ili trovis, sed moviĝante ĉiam oblikve al la subo de la norda montaro. Sed kie ili iris, la plej orienta el la vojoj akompanis ilin, ĝis ĝi deviis premiĝante al la orloj de la montaro, foren al muro da nigra ombro tre antaŭe. Nek homoj nek orkoj nun moviĝis laŭ ĝiaj plataj grizaj etendiĝoj; ĉar la Malhela Mastro jam kompletigis movadon de siaj armeoj, kaj eĉ en la sekureco de la propra regno li celis la sekretecon de

la nokto, timante la ventojn de la mondo, kiu turniĝis kontraŭ lin flankenŝirante liajn vualojn, kaj ĝenate de informoj pri kuraĝaj spionoj trapasintaj liajn barilojn.

La hobitoj progresis jam kelkajn lacigajn mejlojn, kiam ili haltis. Frodo ŝajnis preskaŭ elĉerpita. Sam konstatis, ke li ne povos multe pli progresi tiumaniere, rampante, kliniĝante, jen elektante dubindan vojon tre malrapide, jen stumblokore hastante.

— Ni reiru al la vojo, dum lumo restos, sinjoro Frodo, — li diris. — Denove fidu la bonŝancon! Ĝi preskaŭ perfidis nin lastfoje, sed ne tute. Sendevia rapidado dum kelkaj pliaj mejloj, kaj poste ripozo.

Li riskis multe pli ol li sciis; sed Frodo estis tro okupata pri sia ŝarĝo kaj pri sia mensa luktado por debati, kaj preskaŭ tro senespera por zorgi. Ili grimpis sur la ŝoseon kaj plandis antaŭen laŭ la malmola kruela vojo, kiu kondukis al la Malhela Turego mem. Sed ilia bonŝanco eltenis, kaj dum la resto de tiu tago ili renkontis nenion vivan aŭ moviĝantan; kaj kiam noktiĝis, ili malaperis en la mallumon de Mordoro. La tuta lando nun kovadis kvazaŭ pro la proksimiĝo de granda ŝtormo; ĉar la Komandantoj el la Okcidento jam pasis la Krucvojon kaj kreis flamojn sur la mortigaj kampoj de Imlado Morgul.

Tiel daŭris la senespera vojaĝo, dum la Ringo iris suden, kaj la standardoj de la reĝoj rajdis norden. Al la hobitoj ĉiu tago, ĉiu mejlo, pli malagrablis ol la antaŭa, dum ilia forto malpliiĝis kaj la lando iĝis pli fia. Ili renkontis neniujn malamikojn tage. Nokte kelkfoje, dum ili kaŭris aŭ maltrankvile dormis en iu apudvoja kaŝejo, ili aŭdis kriojn, bruon de multaj piedoj aŭ rapidan trapason de kruele pelata rajdbesto. Sed multe pli malbona ol ĉiuj tiuj danĝeroj estis la ĉiam proksimiĝanta minaco, kiu premis ilin dum la irado: la terura minaco de la Potenco, kiu atendis, kovante en profunda pensado kaj sendorma malico malantaŭ la malhela vualo ĉirkaŭ ĝia Trono. Ĉiam pli proksimen ĝi venis, pli nigre baŭmante, kiel la venonta noktomuro ĉe la lasta fino de la mondo.

Venis finfine noktiĝo terura; kaj ĝuste kiam la Komandantoj el la Okcidento proksimiĝis al la fino de la loĝataj landoj, la du vagantoj alvenis horon de kompleta senespero. Kvar tagoj jam pasis, de kiam ili eskapis de la orkoj, sed la tempo kuŝis malantaŭe, kvazaŭ daŭre nigriĝanta sonĝo. Dum la tuto de tiu ĉi lasta tago Frodo nenion parolis, sed marŝis duonklinite, ofte stumblante, kvazaŭ liaj okuloj ne plu vidus la vojon antaŭ liaj piedoj. Sam konjektis, ke el ĉiuj iliaj doloroj la plej malbonan suferis li, la kreskantan pezon de la Ringo, ŝarĝon al la korpo kaj turmenton en la menso. Malkviete Sam notis, kiel la maldekstra mano de lia mastro ofte leviĝis kvazaŭ por malhelpi baton aŭ por ŝirmi liajn retiriĝemajn okulojn kontraŭ iu terura

Okulo, kiu klopodis enrigardi ilin. Kaj kelkfoje lia dekstra mano ŝteliris al la brusto, kroĉante, kaj poste malrapide, kiam la volo rehavis mastrecon, ĝi estis reprenita.

Nun kiam revenis la nokta nigro, Frodo sidis kun la kapo inter siaj genuoj kaj la brakoj lace pendantaj ĝis la tero, kie kuŝis liaj manoj feble tikantaj. Sam rigardis lin, ĝis la nokto kovris ilin ambaŭ kaj kaŝis ilin unu de la alia. Li ne plu trovis vortojn direblajn, kaj li sin turnis al la propraj malhelaj pensoj. Kiom koncernis lin, kvankam lacan kaj sub ombro de timo, al li restis ankoraŭ iom da forto. La *lembaso* havis karakterizon, sen kiu ili antaŭ longe estus kuŝiĝintaj por morti. Deziron ĝi ne kontentigis, kaj kelkfoje la menso de Sam pleniĝis je memoroj pri manĝaĵoj kaj je sopiro al simplaj pano kaj viando. Kaj tamen tiu vojpano de la elfoj havis potencon, kiu plifortiĝis, kiam vojaĝantoj dependis sole de ĝi sen miksiĝo kun aliaj manĝaĵoj. Ĝi nutris la volon, kaj ĝi havigis forton por elteni kaj por estri tendenojn kaj membrojn netakseble laŭ homa mezuro. Sed nun nova decido necesis. Ili ne plu povis laŭiri tiun ĉi vojon; ĉar ĝi pluiros orienten en la Ombregon, sed la Monto jam baŭmis dekstre, preskaŭ rekte sude, kaj ili devos turniĝi al ĝi. Tamen daŭre antaŭ ĝi etendiĝis larĝa regiono de fuma, senkreskaĵa, cindrokovrita tero.

— Akvon, akvon! — murmuris Sam.

Li jam limigis sin, kaj en lia sekega buŝo lia lango ŝajnis dika kaj ŝvelinta; sed malgraŭ lia tuta zorgado restis al ili nun tre malmulto, eble duono da lia botelo, kaj eble kelkajn tagojn ankoraŭ ili devos pluiri. Jam delonge la tuto estus fortrinkita, se ili ne riskus laŭiri la orkan vojon. Ĉar je longaj interspacoj sur tiu ŝoseo cisternoj estis konstruitaj por uzado de armeoj urĝe senditaj tra la senakvaj regionoj. En unu el ili Sam trovis iom da postrestanta akvo malfreŝa, kotigita de la orkoj, sed tamen ankoraŭ taŭga en ilia malespera situacio. Tamen tio okazis antaŭ unu tago. Ne estis espero pri pli.

Finfine lacigita de siaj zorgoj Sam ekdormetis, rezigninte pri la morgaŭo ĝis ties alveno; li povis fari nenion pli. Sonĝo kaj vekiĝo intermiksiĝis malserene. Li vidis lumojn kiel ĝojaĉajn okulojn, kaj malhelajn rampajn formojn, kaj li aŭdis bruojn kvazaŭ de sovaĝbestoj aŭ terurajn kriojn de torturatoj; kaj li saltleviĝis por konstati la mondon tute malluma kaj ĉirkaŭe nur malplenan nigrecon. Nur unufoje, dum li staris sovaĝe ĉirkaŭgapante, ŝajnis al li, kvankam li jam estis maldorma, ke li povis plu vidi palajn lumojn okulsimilajn; sed baldaŭ tiuj estingiĝis kaj malaperis.

La malaminda nokto pasis malrapide kaj nevolonte. La taglumo kiu sekvis estis malbrila; ĉar ĉi tie pro la proksimiĝo de la Monto la aero ĉiam nebulecis, dum el la Malhela Turego rampis la ombrovualoj, kiujn Saŭrono

teksis ĉirkaŭ sin. Frodo estis senmove kuŝanta surdorse. Sam staris apud li, malema paroli, kaj tamen scianta, ke nun la parolo estis lia; li devas funkciigi la mastran volon por plua klopodo. Finfine, kliniĝante kaj karesante la frunton de Frodo, li diris en ties orelon:

— Vekiĝu, mastro! La tempo rekomenci.

Kvazaŭ vigligite de subita sonoro, Frodo leviĝis rapide, kaj staris rigardante suden; sed kiam liaj okuloj vidis la Monton kaj la dezerton, li denove retiriĝis.

— Mi ne kapablas, Sam, — li diris. — Ĝi estas tia pezego portenda, tia pezego.

Sam sciis antaŭ paroli, ke estos vane, kaj tiaj vortoj eble pli misefikos ol bonfaros, sed pro kompato li ne povis silenti.

— Do, permesu, ke portu ĝin iomete mi, mastro, — li diris. — Vi scias, ke mi tion farus, kaj feliĉe tiel longe kiel mi havus forton.

Sovaĝa lumo aperis en la okuloj de Frodo.

— Staru for! Ne tuŝu min! — li kriis. — Ĝi estas mia, mi diras. Foriru! — Lia mano vagis al la glavtenilo. Sed poste lia voĉo rapide ŝanĝiĝis kaj li diris triste: — Ne, ne, Sam. Sed vi devas kompreni. Ĝi estas mia ŝarĝo, kaj neniu alia povas porti ĝin. Estas jam tro malfrue, kara Sam. Vi ne povos plu helpi min tiumaniere. Mi estas jam preskaŭ sub ĝia potenco. Mi ne povas rezigni pri ĝi, kaj se vi provus preni ĝin, mi freneziĝus.

— Mi komprenas, — Sam kapjesis. — Sed mi pripensis, sinjoro Frodo, ke ekzistas aliaj aferoj, sen kiuj ni ne suferus. Kial ne malpezigi iom la ŝarĝon? Ni iru nun tien tiel sendevie, kiel ni povos. — Li indikis la Monton. — Ne valoras kunpreni ion, kion ni certe ne bezonos.

Frodo denove rigardis al la Monto.

— Ne, — li diris, — ne multon ni bezonos sur tiu vojo. Kaj ĉe la fino nenion.

Levinte sian orkan ŝildon li forĵetis ĝin kaj poste sian kaskon. Demetinte la grizan mantelon li malligis la pezan zonon kaj lasis ĝin fali al la tero, kaj kun ĝi la eningan glavon. La ĉifonojn de la nigra mantelo li forŝiris kaj disĵetis.

— Jen, mi ne plu estu orko, — li kriis, — kaj neniun armilon mi portos, ĉu bonan ĉu misan. Oni kaptu min, se tiel estos!

Sam faris same kaj flankenmetis sian orkan ekipaĵon, kaj li eligis ĉiujn aĵojn el sia tornistro. Ial ĉiu el ili iĝis al li kara, se nur pro tio, ke li portis ilin tiom pene tiom longe. Plej malfacile estis formeti lian kuirilaron. Larmoj aperis en liaj okuloj pro la penso pri forĵeto.

— Ĉu vi memoras tiun pecon da kuniklo, sinjoro Frodo? Kaj nian lokon sub la varma teramaso en la lando de komandanto Faramiro, dum la tago,

kiam mi vidis olifonton?

— Ne, bedaŭrinde ne, Sam, — diris Frodo. — Almenaŭ, mi scias, ke okazis tiaj aferoj, sed mi ne povas vidi ilin. Neniu gusto manĝaĵa, sento pri akvo, bruo de vento, memoro pri arbo aŭ herbo aŭ floro, imago pri luno aŭ stelo restas al mi. Mi estas nuda en la mallumo, Sam, kaj neniu vualo estas inter mi kaj la rado de fajro. Mi komencas vidi tiun per miaj vekiĝantaj okuloj, kaj ĉio alia forvelkas.

Sam aliris kaj kisis lian manon.

— Do ju pli baldaŭ ni liberiĝos de ĝi, des pli baldaŭ ni ripozos, — li diris heziteme, trovinte neniujn preferindajn vortojn por diri. — Parolado nenion riparos, — li murmuris al si, dum li kunmetis ĉion, kion li elektis forĵeti. Li ne volis lasi ilin kuŝantaj malkaŝe en la sovaĝejo videblaj de ajnaj okuloj. — Fetorulo akiris tiun orkan ĉemizon, ŝajne, kaj li ne aldonu al tio glavon. Liaj manoj sufiĉe misfaras kiam malplenaj. Kaj li ne okupiĝu pri miaj kuiriloj!

Dirinte tion, li forportis la tutan ekipaĵon al unu el la gapaj fendaĵoj, kiuj trastrekis la regionon, kaj enĵetis ilin. La klakado de liaj amataj kuiriloj, falantaj en la mallumon, similis al lia koro mortsonoron. Li revenis al Frodo, kaj tiam el la elfa ŝnuro li tranĉis mallongan pecon por zoni sian mastron kaj ligi la grizan mantelon firme ĉirkaŭ ties talion. La ceteron li zorge volvis kaj remetis en sian tornistron. Krom tiu li retenis nur la restaĵon de ilia vojpano, akvobotelon, kaj Pikilon plu pendantan ĉe lia zono, kaj la flakoneton de Galadriela forkaŝitan en poŝo de sia tuniko proksime al sia brusto, kaj la skatoleton, kiun ŝi donis al li por li mem.

Nun finfine ili turnis siajn vizaĝojn al la Monto kaj ekiris, ne plu pensante pri kaŝiĝo, celante sian lacecon kaj malfortiĝantajn volojn nur al la tasko iri antaŭen. En la malhelo de ĝia morna tago, malmultaj kreitoj eĉ en tiu lando atentema povus ekvidi ilin, krom de tre proksime. El ĉiuj sklavoj de la Malhela Mastro, nur la nazguloj povus averti lin pri la danĝero, kiu rampis eta sed netimigebla en la kernon mem de lia gardata regno. Sed la nazguloj kaj ties nigraj flugiloj estis for pro alia komisio: ili estis kuniĝintaj en foro, sekvante la marŝadon de la Komandantoj el la Okcidento, kaj tien la pensado de la Malhela Turego estis turnita.

Tiutage ŝajnis al Sam, ke lia mastro trovis ian novan forton, pli ol povus klarigi la malgranda malpeziĝo de la ŝarĝo, kiun li devis porti. En la komenco ili iris pli foren kaj pli rapide, ol ili anticipe esperis. La tereno estis malglata kaj malfavora, kaj tamen ili multe progresis, kaj ĉiam la Monto proksimiĝis. Sed dum la tago pasis, kaj nur tro baldaŭ la malhela lumo ekforvelkis, Frodo denove kliniĝis kaj ŝanceliĝis, kvazaŭ la renovigita peno disipis lian restantan forton.

Ĉe ilia lasta halto li sinkis teren kaj diris:

— Mi soifas, Sam, — kaj ne plu parolis.

Sam donis al li buŝplenon da akvo; restis nur ankoraŭ unu buŝpleno. Li mem detenis sin; kaj kiam la nokto de Mordoro denove enfermis ilin, tra ĉiuj liaj pensoj venis memoro pri akvo; kaj ĉiu rojo aŭ rivereto aŭ fonto iam ajn de li viditaj, sub verdaj salikombroj aŭ briletantaj en la suno, dancis kaj ondetis turmente al li malantaŭ la blindo de liaj okuloj. Li sentis la malvarmetan koton sur la piedfingroj, dum li vadis en la lageto ĉe Apudakvo kun Ĝoja Kotono kaj Tomĉjo kaj Nibĉjo kaj ilia fratino Rozinjo.

— Sed tio estis antaŭ jaroj, — li suspiris, — kaj tre malproksime. La vojo returnen, se tia ekzistas, preterpasas la Monton.

Li ne povis dormi kaj li interne debatis kun si.

— Nu vidu, ni faris pli bone ol vi esperis, — li diris bravule. —

Bona komenco ĉiuokaze. Mi kalkulas, ke ni trairis duonon de la distanco antaŭ ol halti. Ankoraŭ unu tago sufiĉos. Kaj tiam li paŭzis.

— Ne estu stultulo, Sam Vato, — venis responde lia propra voĉo.

— Li ne trairos simile ankoraŭ unu tagon, se li entute moviĝos. Kaj vi ne povos same daŭrigi, donante al li la tutan akvon kaj plejparton el la manĝaĵo.

— Mi tamen povos daŭrigi sufiĉe longe, kaj tion mi faros.

— Kien?

— Al la Monto, kompreneble.

— Sed kio poste, Sam Vato, kio poste? Kiam vi alvenos tien, kion vi faros? Li ne kapablos mem fari ion.

Konsternite Sam konstatis, ke li ne scias respondon al tio. Li tute ne havis klaran koncepton. Frodo ne multe parolis al li pri sia komisio, kaj Sam nur sciis malprecize, ke la Ringo estas iel enmetota en la fajron.

— La Fendaĵoj de l' Destino, — li murmuris, kiam la malnova nomo leviĝis en lian menson. — Nu, se la mastro scias, kie trovi ilin, mi nenscias.

— Jen vi havas! — venis la respondo. — Ĉio tute senutilas. Li mem diris tion. La stultulo estas vi, kiu daŭre esperas kaj penadas. Vi povus kuŝiĝi kaj endormiĝi kune jam antaŭ tagoj, se vi ne estus tiom obstina. Sed vi mortos ĉiuokaze same, aŭ pli malbone. Egale vi povas kuŝiĝi nun kaj rezigni. Vi neniam atingos la supron ĉiuokaze.

— Mi atingos ĝin, eĉ se mi lasos malantaŭe ĉion krom miaj ostoj, — diris Sam. — Kaj mi portos sinjoron Frodo supren, eĉ se tio rompos mian dorson kaj mian koron. Do ĉesigu la diskutadon!

Sam sentis skuiĝon de la tero sube, kaj li aŭdis aŭ sentis profundan foran bruon kvazaŭ de tondro enkarcerigita sub la tero. Mallonga ruĝa flamo ekflagris sub la nuboj kaj formortis. La Monto dormis tro maltrankvile.

La lasta stadio de ilia vojaĝo al Orodruino venis, kaj ĝi estis turmento pli severa, ol Sam iam ajn pensis toleri. Li estis doloranta, kaj tiel soifega, ke li ne plu povis gluti eĉ buŝplenon da manĝaĵo. La mallumo daŭris, ne nur pro la fumoj de la Monto: ŝajnis, ke ŝtormo proksimiĝas, kaj fore en la sud-oriento vidiĝis ekbrilo de fulmoj sub la nigra ĉielo. Plej malbone, la aero plenplenis je fetoroj; spirado estis doloriga kaj malfacila, kaj kapturniĝo trafis ilin, tiel, ke ili ŝanceliĝis kaj ofte falis. Kaj tamen iliaj volfortoj ne konsentis cedi, kaj ili baraktis antaŭen.

La Monto rampis ĉiam pli proksimen, ĝis, se ili levis la pezajn kapojn, ĝi plenigis la tutan vidkampon, baŭmante enorme antaŭ ili: grandega amaso da cindroj kaj skorio kaj bruligitaj ŝtonoj, el kiuj krutflanka konuso leviĝis en la nubojn. Antaŭ ol finiĝis la taglonga krepusko kaj revenis nokto vera, ili rampis kaj stumblis ĝis ties subo mem.

Kun ĝemspiro Frodo ĵetis sin teren. Sam sidiĝis apud li. Surprizite li sentis sin laca, tamen pli malpeza, kaj lia kapo ŝajnis denove klara. Neniuj pliaj diskutoj perturbis lian menson. Li konis ĉiujn argumentojn pri malespero kaj rifuzis aŭskulti ilin. Lia volo estis determinita, kaj nur morto rompus ĝin. Li sentis ne plu deziron aŭ bezonon dormi, sed prefere atentemon. Li sciis, ke ĉiuj hazardoj kaj danĝeroj jam kuniĝas al pinto: la posta tago estos tago destina, la tago de fina strebo aŭ katastrofo, la lasta spirego.

Sed kiam ĝi venos? La nokto ŝajnis senfina kaj ekstertempa; minuto post minuto falis morta, kaj adiciis al neniu pasa horo, alportante neniun ŝanĝiĝon. Sam komencis scivoli, ĉu dua mallumo jam komenciĝis kaj neniu tago iam reaperos. Finfine li palpserĉis la manon de Frodo. Tiu estis malvarma kaj tremetanta. Lia mastro frostotremis.

— Mi ja ne devis postlasi mian lankovrilon, — murmuris Sam; kaj kuŝiĝinte li provis konsoli Frodon per siaj brakoj kaj korpo. Tiam dormo okupis lin, kaj la malhela lumo de ilia lasta serĉtago trovis ilin flank-apud-flankaj. La vento malfortiĝis dum la antaŭa tago deviante el la okcidento, kaj nun ĝi venis el la nordo kaj ekplifortiĝis; kaj malrapide la lumo de la nevidata suno filtriĝis suben en la ombrojn, kie kuŝis la hobitoj.

— Jam temp' está! Jam ek al la lasta peno! — diris Sam, barakte stariĝante. Li klinis sin al Frodo, vekante lin delikate. Frodo ĝemis; sed per granda vola klopodo li stariĝis ŝanceliĝe kaj poste falis denove surgenuen. Li levis malfacile siajn okulojn al la malbelaj deklivoj de la Monto de Sorto turantaj super li, kaj poste ekgrimpis kompatoveke antaŭen per la manoj.

Sam rigardis lin kaj ploris en sia koro, sed venis neniuj larmoj al liaj sekaj kaj brulsentaj okuloj.

— Mi diris, ke mi portos lin eĉ se tio rompos mian dorson, — li

murmuris, — kaj tion mi ja faros!

— Venu, sinjoro Frodo! — li kriis. — Mi ne povas porti ĝin anstataŭ vi, sed mi povas porti vin kaj samtempe ĝin. Do stariĝu! Venu, sinjoro Frodo kara! Sam rajdigos vin. Nur diru al li, kien iri, kaj li iros.

Dum Frodo kroĉiĝis al lia dorso kun la brakoj malstrikte ĉirkaŭ lia kolo kaj la kruroj firme tenitaj sub liaj brakoj, Sam ŝancele stariĝis; kaj mirigite trovis la ŝarĝon malpeza. Li antaŭtimis, ke li apenaŭ sufiĉe fortos por levi sian mastron, kaj krom tio li atendis dividi la teruran stumbligan pezon de la malbenita Ringo. Sed tiel ne estis. Ĉu pro tio, ke Frodo estis tiel trivita per siaj longaj doloroj, tranĉila vundo, venena pikiĝo, kaj malĝojo, timo kaj senhejma vagado, aŭ pro tio, ke al li estis donita iu donaco de lasta forto, Sam levis Frodon ne pli malfacile ol se li portus iun hobitan infanon surdorse dum ludado sur razenoj aŭ grenkampoj en la Provinco. Li faris profundan spiron kaj ekiris.

Ili alvenis la subon de la Monto ĉe ties norda flanko, kaj iomete okcidente; tie ĝiaj longaj grizaj deklivoj, kvankam rompitaj, ne estis krutaj. Frodo ne parolis, kaj tial Sam klopodis antaŭen laŭ sia kapablo, sen alia gvidado ol la obstino grimpi laŭeble plej alten antaŭ ol lia forto elĉerpiĝos kaj lia volo cedos. Antaŭen li penis, supren kaj pli supren, turniĝante tien kaj tien por malpliigi la deklivon, ofte stumblante antaŭen, kaj fine rampante kiel heliko kun peza ŝarĝo sur la dorso. Kiam lia volo ne povis peli lin pluen, kaj liaj membroj rezignis, li haltis kaj milde kuŝigis sian mastron.

Frodo malfermis siajn okulojn kaj profunde enspiris. Estis pli facile spiri ĉi tie super la fetoroj, kiuj volviĝis kaj drivis tie sube.

— Dankon, Sam, — li diris per rompita flustro. — Kiom longas la vojo ankoraŭ?

— Mi ne scias, — diris Sam, — ĉar mi ne scias, kien ni iras.

Li retrorigardis, kaj poste li rigardis supren; mirigis lin, kiom distance lia lasta klopodo trairigis lin. La Monto, starante minaca kaj izolita, aspektis pli alta ol ĝi efektive estis. Sam vidis nun, ke ĝi estas malpli impona ol la altaj trapasejoj de Efelo Duad, kiujn li kaj Frodo pli frue grimpis. La konfuzitaj kaj rompitaj ŝultroj de ĝia granda fundamento leviĝis eble tri mil futojn super la ebenaĵo, kaj super ili duone pli alten baŭmis ĝia alta centra konuso, kiel vasta lupolsekigejo aŭ kameno ĉapelita per zigzaga kratero. Sed Sam estis jam pli ol duonvoje supre sur la fundamento, kaj la ebenaĵo de Gorgoroto estis malklara sub li, volvita en fumo kaj ombro. Rigardante supren li eligus krion, se tion permesus al li la sekega gorĝo; ĉar inter la malebenaj ĝiboj kaj ŝultroj super li, li klare vidis padon aŭ vojon. Tiu leviĝis kvazaŭ suprenira zono el la okcidento kaj serpentece ĉirkaŭumis la Monton,

ĝis antaŭ ol forpasi el la vidkampo ĝi atingis la subon de la konuso ĉe ties orienta flanko.

Sam ne povis vidi la irejon tuj super li, kie ĝi plej malaltis, ĉar kruta deklivo supreniĝis de lia starloko; sed li konjektis, ke se ili povus barakti iomete pli supren, ili trafus tiun padon. Ekbrilo de espero revenis al li. Eble ili tamen venkos la Monton.

— Nu, estas kvazaŭ oni intence metis la vojon ĉi tie! — li diris al si. — Se ĝi ne estus tie, mi devus deklari min venkita ĉe la fino.

La pado ne estis metita por la celoj de Sam. Li tion ne sciis, sed li rigardis la Saŭronan Vojon de Baraduro al Samato Naŭr, la Ĉambroj de Fajro. Tra la enorma okcidenta pordo de la Malhela Turego ĝi transiris profundan abismon per granda ponto el fero, kaj poste pasinte sur la ebenaĵon ĝi pluiris tra leŭgo inter du fumantaj fendegaĵoj, kaj tiel atingis longan deklivan vojon, kiu kondukis supren al la orienta flanko de la Monto. De tie, serpentumante kaj ĉirkaŭante ĝian tutan larĝan mezuron de la sudo al la nordo, ĝi grimpis fine, alte sur la supra konuso, sed ankoraŭ malproksime de la fetoranta kresto, al malhela enirejo, kiu retrorigardis orienten rekte al la Fenestro de la Okulo en la ombrumita fortikaĵo de Saŭrono. Ofte barita aŭ detruita per la tumultoj de la Montaj fornoj, ĉiam tiu pado estis riparata kaj reliberigata per la laboro de sennombraj orkoj.

Sam profunde enspiris. Ekzistis pado, sed kiel li supreniros la deklivon al ĝi, li ne sciis. Unue li devos ripozigi sian doloran dorson. Li kuŝis plate apud Frodo dum kelka tempo. Neniu el ambaŭ parolis. Malrapide la lumo plifortiĝis. Subite sento de urĝeco, kiun li ne komprenis, venis al Sam. Estis preskaŭ, kvazaŭ li estus vokita: “Nun, nun, aŭ estos tro malfrue!” Li pretigis sin kaj stariĝis. Ŝajnis, ke ankaŭ Frodo sentis la alvokon. Li baraktis surgenuen.

— Mi rampos, Sam, — li anhelis.

Do futon post futo, kvazaŭ grizaj insektetoj, ili rampis supren sur la deklivo. Ili atingis la padon kaj trovis, ke ĝi estas larĝa, pavimita per rompitaj ŝtonruboj kaj pistitaj cindroj. Frodo grimpis sur ĝin, kaj poste, kvazaŭ motivita de iu devigo, li turniĝis malrapide por fronti al la oriento. Fore pendis la ombroj de Saŭrono; sed ŝiritaj de iu ekblovo de vento el la mondo, aŭ eble movitaj de iu granda interna malkvieto, la nubmantelo kirliĝis kaj por momento tiriĝis flanken, kaj tiam li vidis, leviĝantajn nigre, pli nigre kaj pli malhele ol la vastaj ombroj inter kiuj ĝi staris, la kruelajn pinaklojn kaj feran kreston de la plej supera turo de Baraduro. Nur dum momento ĝi vidiĝis, sed kvazaŭ tra iu fenestrego nemezureble alta pikiĝis norden ruĝa flamo, la flagro de la trapika Okulo. Poste la ombroj ferliĝis denove, kaj la terura vidaĵo malaperis. La Okulo ne estis turnita al ili: ĝi

rigardis norden, kie la Komandantoj el la Okcidento staris defie, kaj tien turniĝis nun ĝia tuta malico, kiam la Potenco moviĝis por efektivigi sian mortigan baton; sed Frodo pro tiu terura ekvido falis kvazaŭ mortvundito. Lia mano serĉis la ĉenon ĉirkaŭ la kolo.

Sam genuiĝis apud li. Mallaŭte, preskaŭ neaŭdeble, li aŭskultis la flustron de Frodo:

— Helpu min, Sam! Helpu min, Sam! Tenu mian manon! Mi ne povas malhelpi ĝin.

Sam prenis la manojn de sia mastro kaj kunmetis ilin polm-al-polme, kaj kisis ilin; kaj poste li tenis ilin kompateme inter la siaj. Subite venis al li la penso: “Li rimarkis nin! Estas finite, aŭ baldaŭ estos. Jen, Sam Vato, jen estas la fina fino”.

Denove li levis Frodon kaj subentiris liajn manojn sur la propran bruston, lasante pendi la mastrajn krurojn. Poste li klinis la kapon kaj penis plu laŭ la suprenira vojo. La vojo ne estis tiel facila kiel unuavide ŝajnis. Bonŝance la fajroj, kiuj elverŝiĝis dum la grandaj perturbiĝoj, kiam Sam staris sur Cirito Ungol, subenfluis plejparte sur la suda kaj okcidenta deklivoj, kaj la ĉi-flanka vojo ne estis barita. Tamen ĝi estis multloke diseriĝinta aŭ ĝin transis gapaj ŝiraĵoj. Rampinte orienten dum kelka tempo, ĝi retrokurbiĝis akrangule kaj kelktempe celis okcidenten. Tie ĉe la kurbiĝo ĝi estis profunde tranĉita tra amaso da malnovaj veterumitaj ŝtonoj, antaŭlonge vomitaj el la fornoj de la Monto. Anhelante pro sia ŝarĝo, Sam ĉirkaŭiris la kurbon; kaj ĝuste kiam li tion faris, li okulangule ekvidis ion falantan de sur la ŝtonamaso, kvazaŭ peceto de nigra ŝtono defalis, dum li pasis.

Subite pezaĵo frapis lin, kaj li falegis antaŭen, ŝirante la dorsojn de la manoj, kiuj plu tenis tiujn de lia mastro. Kaj li eksciis, kio okazis, ĉar kuŝante li aŭdis super si voĉon malamatan.

— Missa masstro! — ĝi siblis. — Missa masstro trompas nin; trompas Smeagolon, *golum*. Li devass ne iri tiuvoje. Li devass ne damaĝi la Trezoron. Donu ĝin al Smeagolo, jesss, donu ĝin al ni! Donu ĝin al ni!

Per forta puŝo Sam stariĝis. Tuj li elingigis sian glavon; sed li povis fari nenion. Golumo kaj Frodo estis kunkroĉitaj. Golumo ŝiradis lian mastron, klopodante atingi la ĉenon kaj la Ringon. Probable nenio alia ol tio povus stimuli la velkantan ardon en la koro kaj volo de Frodo: atako, provo perforte senigi lin de lia trezoro. Li kontraŭluktis laŭ subita furiozo, kiu mirigis Samon kaj ankaŭ Golumon. Eĉ tiel la afero eble rezultiĝus tute alie, se Golumo mem estus neŝanĝita; sed la teruraj vojoj, kiujn li sola kaj malsata kaj senakva tramarŝis, pelite de konsuma deziro kaj timego, lasis sur li dolorajn postsignojn. Li estis kreito magra, malsatigita, marasma, tute

osteca, kun streĉita flaveca haŭto. Furioza lumo flamis en liaj okuloj, sed lian malicon ne plu egalis lia malnova tenega forto. Frodo forĵetis lin kaj leviĝis tremetante.

— Suben, suben! — li anhelis, kroĉante sian manon al sia brusto, tiel ke sub sia ledĉemiza kovraĵo li kaptis la Ringon. — Suben, rampulo, kaj for el mia vojo! Via tempo finiĝis. Vi jam ne povas min perfidi aŭ mortigi.

Tiam subite, kiel antaŭe sub la randoj de Emin Muilo, Sam vidis tiujn du rivalojn laŭ alia vizio. Kaŭra figuro, apenaŭ pli ol ombro de vivantaĵo, kreito nun tute ruinigita kaj venkita, tamen plenigita de hida avidego kaj kolero; sed antaŭ tiu staris severa, jam netuŝebla de kompato, figuro blankvestita, sed ĉe la brusto ĝi tenis radon fajran. El la fajro parolis komanda voĉo:

— Foriru, kaj ne plu ĝenu min! Se vi iam ajn tuŝos min denove, vi mem estos ĵetita en la Fajron de Destino.

La kaŭra figuro retromoviĝis kun teruro en la palpebrumantaj okuloj, kaj tamen samtempe kun nesatigebla deziro.

Poste la vizio pasis, kaj Sam vidis Frodon staranta kun mano ĉebruste; lia spiro venis anhelege, kaj Golumo estis antaŭ liaj piedoj, apogite sur siaj genuoj kaj kun la manoj larĝe dismetitaj sur la tero.

— Gardu vin! — kriis Sam. — Li alsaltos! — Li paŝis antaŭen, svingante sian glavon. — Rapide, mastro! Iru! Iru! La tempo urĝas. Lin mi pritraktos. Iru jam!

Frodo rigardis lin kvazaŭ iun tre malproksiman.

— Jes, mi devas pluiri. Adiaŭ, Sam! Jen fine la fino. Sur la Monto de Sorto la sorto plenumiĝos. Adiaŭ! — Li turnis sin kaj pluiris, marŝante malrapide sed senkliniĝe, laŭ la suprenira pado.

— Nun! — diris Sam. — Finfine mi povas pritrakti vin! — Li saltis antaŭen kun elingigita glavo preta por batalo. Sed Golumo ne saltis. Li kuŝis plata sur la tero kaj ploretis.

— Ne mortigu nin, — li plorĝemis. — Ne damaĝu nin per fia kruela ŝŝtalo! Lasu nin vivi, jesss, vivi nur iomete pli longe. Perditaj, perditaj! Ni estas perditaj. Kaj kiam la Trezoro foriros, ni mortos, jesss, mortos en la polvon. — Li trarastis la cindrojn de la pado per siaj longaj senkarnaj fingroj. — Jess, polvo! — Li siblis.

La mano de Sam hezitis. Lia menso estis arde kolera pro memoro pri la misado. Estus juste mortigi tiun perfideman murdeman kreaĵon, juste kaj multfoje meritite; kaj tio ankaŭ ŝajnis la sola sekura faro. Sed profunde en lia koro io bremsis lin: li ne kapablis bati tiun kreaĵon kuŝantan en la polvo, forlasitan, ruiniĝintan, komplete mizeran. Li mem, kvankam nur mallonge, iam portis la Ringon, kaj nun li malklare divenis la agonion en la Golumaj

ŝrumpintaj menso kaj korpo, sklavigitaj de tiu Ringo, senkapablaj iam ajn denove en la vivo trovi trankvilon aŭ malŝarĝiĝon. Sed Sam malhavis vortojn por esprimi sian senton.

— Ho, estu malbenita, fetorulo! — li diris. — Foriru! For! Mi ne fidas vin, eĉ tiom fore, kiom mi kapablas piedbati vin; sed foriru. Aŭ mi ja damaĝos vin, jes, per fia kruela ŝtalo.

Golumo ekstaris kvarpiede kaj retroiris kelkajn paŝojn, kaj poste li turnis sin, kaj dum Sam celis al li piedbaton li fuĝis laŭ la pado. Sam ne plu atentis lin. Li subite rememoris pri sia mastro. Li suprenrigardis laŭ la pado kaj ne povis vidi lin. Kiel eble plej rapide li plandis laŭ la vojo supren. Se li retrorigardus, li eble vidus, ke ne malproksime sube Golumo returnis sin denove, kaj poste kun sovaĝa lumo de frenezo en la okuloj, rapide tamen singarde, plurampis malantaŭe, kiel ŝtelira ombro inter la ŝtonoj.

La pado plu iris supren. Baldaŭ ĝi denove kurbiĝis, kaj laŭ la lasta direktiĝo orienten, ĝi pasis tra fendaĵo laŭ la faco de l' konuso kaj alvenis la malhelan pordon en la Monta flanko, la pordon de Samato Naŭr. Jam fore la suno, leviĝinta en la sudo, breĉante la fumojn kaj nebuleton, brulis misaŭgure, malbrila ŝmirita disko ruĝa; sed la tuta Mordoro kuŝis ĉirkaŭ la Monto kiel lando morta, silenta, enfaldita per ombro, atendanta iun teruran baton.

Sam alvenis la gapan enirejon kaj enrigardis. Estis malhele kaj varmege, kaj profunda bruado skuis la aeron.

— Frodo! Mastro! — li vokis. Venis neniu respondo. Momente li staris, dum lia koro batis pro konsternaj timoj, kaj poste li enplonĝis. Ombro sekvis lin.

Komence li povis vidi nenion. Pro la granda bezono li elprenis ankoraŭfoje la flakoneton de Galadriela, sed ĝi estis pala kaj malvarma en lia trema mano kaj ĵetis neniom da lumo en tiun sufokan malhelon. Li venis al la kerno de la regno de Saŭrono kaj al la forĝejoj de lia antikva potenco, plej granda en Mez-Tero. Ĉiuj ceteraj potencoj estis ĉi tie superitaj. Timeme li faris kelkajn malcertajn paŝojn en la mallumo, kaj tiam tute subite vidiĝis mĝa flagro, kiu saltis supren kaj frapis la altan nigran plafonon. Tiam Sam konstatis, ke li estas en longa kaverno aŭ tunelo, kiu boris la fumantan konuson de la Monto. Sed nur mallonge antaŭe ĝia planko kaj la muroj ambaŭflankaj estis dispartigitaj de granda fendaĵo, el kiu venis la mĝa flagro, jen saltanta supren, jen formortanta en mallumon; kaj la tutan tempon forsube aŭdiĝis rumoro kaj tumulto kvazaŭ maŝinegoj pulsus kaj laborus.

Denove la lumo saltis supren, kaj ĉe la rando de la abismo, ĉe la Fendaĵo de Destino, staris Frodo, nigra antaŭ la brilo, streĉita, malkliniĝa, sed

senmova kvazaŭ ŝtonigita.

— Mastro! — kriis Sam.

Frodo moviĝis kaj parolis per klara voĉo, efektive per voĉo pli klara kaj pli forta ol Sam iam ajn aŭdis lin uzi, kaj ĝi soris super la pulsado kaj perturbiĝo de Monto de Sorto, sonorante ĉe la plafono kaj muroj.

— Mi venis, — li diris. — Sed nun mi ne elektas fari tion, kion mi venis por fari. Tion ĉi mi ne faros. La Ringo estas mia! — Kaj subite, kiam li surfingrigis ĝin, li malaperis de la vido de Sam. Sam ĝemspiris, sed li ne havis eblecon ekkrii, ĉar tiumomente okazis multaj aferoj.

Io frapegis la dorson de Sam, liaj kruroj estis forbatitaj de sub li, kaj li estis ĵetita flanken, frapante sian kapon al la ŝtona planko, kiam malhela figuro transsaltis lin. Li kuŝis senmove, kaj momente ĉio nigriĝis al li.

Kaj tre malproksime, kiam Frodo surfingrigis la Ringon kaj pretendis ĝin por si en Samato Naŭr, la kerno mem de lia regno, la Potenco en Baraduro estis skuita, kaj la Turego tremis de la fundamento ĝis la fera pinto. La Malhela Mastro subite konsciiĝis pri li, kaj lia Okulo breĉanta ĉiujn ombrojn, rigardis trans la ebenaĵon al la pordo kiun li kreis; kaj la grandeco de la propra stulteco riveliĝis al li en fulma ekbrilo, kaj ĉiuj planoj de liaj malamikoj estis finfine malkaŝitaj. Lia kolerego ekfajris en konsuma flamo, sed lia timo leviĝis kvazaŭ vasta nigra fumo por sufoki lin. Ĉar li konstatis sian mortdanĝeron kaj la fadenon, sur kiu nun pendis lia sorto.

El ĉiuj liaj politikoj kaj araneaĵoj de timo kaj perfido, el ĉiuj liaj strategioj kaj militoj lia menso skuiĝis liberiĝe; kaj tra lia tuta regno kuris tremo, liaj sklavoj kuntiriĝis, kaj liaj armeoj haltis, kaj liaj komandantoj estis subite senstirilaj, senigitaj je volo, hezitadis kaj malesperis, ĉar ili estis forgesitaj. La menso kaj intenco de la Potenco, kiu regis ilin, estis jam direktitaj tute plenforte al la Monto. Pro lia alvoko, girinte kun ŝira kriĉo, en lasta fervorega vetkuro flugis pli rapide ol la ventoj la nazguloj, la ringofantomoj, kaj kun ŝtormo de flugiloj ili impetegis suden al Monto de Sorto.

Sam stariĝis. Li estis konfuzita, kaj sango fluanta de lia kapo, gutis en liajn okulojn. Li palpiris antaŭen, kaj poste li vidis ion strangan kaj teruran. Golumo sur la rando de l' abismo luktis frenezece kontraŭ malamiko nevidebla. Tien-reen li balanciĝis, jen tiel proksima al la rando, ke li preskaŭ enfalis, jen treniĝante retro, falante kaj restariĝante. Kaj la tutan tempon li siblis, sed diris neniun vorton.

La fajroj sube vekiĝis kolere, la ruĝa lumo ekflamis, kaj la tutan kavernon plenigis forta brilo kaj granda varmo. Subite Sam vidis la longajn manojn de Golumo supreniri al lia buŝo; liaj blankaj dentegoj brilis kaj poste kunfermiĝis morde. Frodo ekkriis, kaj jen li aperis, falinta surgenuen

ĉe la rando de l' abismo. Sed Golumo, dancante frenezule, tenis alte la Ringon kun fingro ankoraŭ traŝovita interne de ĝia cirklo. Ĝi brilis nun kvazaŭ vere ĝi estus farita el viva fajro.

— Trezoro, trezoro, trezoro! — Golumo kriis. — Mia Trezoro! Ho mia Trezoro! — Kaj tion dirinte, ĝuste kiam liaj okuloj estis levitaj por triumfi pri la predo, li mispaŝis, kliniĝis, balanciĝis momente ĉe la rando, kaj poste li falis kriĉante. El la profundaĵo venis lia lasta lamento "Trezoro", kaj li estis for.

Sekvis rumoro kaj granda brukonfuziĝo. Fajroj saltis supren kaj lekis la plafonon. La pulsado iĝis granda tumulto, kaj la Monto skuiĝis. Sam kuris al Frodo, levis lin kaj portis lin eksteren ĝis la pordo. Kaj tie sur la malhela sojlo de Samato Naŭr, alte super la ebenaĵoj de Mordoro, tia mirego kaj teruro trafis lin, ke li, forgesinte ĉion alian, senmove staris kaj gapis kvazaŭ ŝtoniĝinto.

Mallonge li vidis kirliĝantan nubaron, kaj en ties mezo turojn kaj remparojn, montece altajn, fonditajn sur grandioza montotrono super nemezureblaj putoj; grandajn kortojn kaj karcerojn, senokulajn prizonojn klife apikajn, kaj gapajn pordojn el ŝtalo kaj diamantoj: kaj poste ĉio forpasis. Turegoj falis kaj montoj glitis suben; muroj diseriĝis kaj fandiĝis falegante; vastaj fumspiraloj kaj sputantaj vaporoj ondiĝis supren, supren, ĝis ili falis kiel ondo inundanta, kaj ties sovaĝa kresto kurbiĝis kaj falis ŝaŭmante sur la teron. Kaj poste finfine tra la mejloj intere venis murmurego, fortiĝante al surdigaj krako kaj muĝo; la tero skuiĝis, la ebenaĵo supren puŝiĝis kaj fendiĝis, kaj Orodruino ŝanceliĝis. Fajro ruktis el ĝia fendita supraĵo. La ĉielo ektondris bruligate de fulmoj. Kiel draŝantaj vipoj falis torento da nigra pluvo. Kaj en la kernon de la ŝtormo, kun kriĉo, kiu superis ĉiujn aliajn bruojn, disŝirante la nubojn, venis la nazguloj, pafiĝante kiel flamsagoj, sed kaptitaj per fajra ruino de montoj kaj ĉielo ili krakis, ŝrumpis kaj malaperis.

— Nu, tio estas la fino, Sam Vato, — diris voĉo apude. Kaj jen estis Frodo, pala kaj elĉerpita, kaj tamen denove si mem; kaj en liaj okuloj nun estis paco, nek vola streĉiteco, nek frenezo, nek ajna timo. Lia ŝarĝo estis forigita. Jen estis la kara mastro el la dolĉaj tagoj de la Provinco.

— Mastro! — ekkriis Sam, kaj falis surgenuen. En tiu tuta ruiniĝo de la mondo, momente li spertis nur ĝojon, grandan ĝojon. La ŝarĝo estis for. Lia mastro estis savita; li estis denove si mem, li estis libera. Kaj tiam Sam ekvidis la vunditan kaj sangantan manon.

— Via kompatinda mano! — li diris. — Kaj mi havas nenion por vindi aŭ komfortigi ĝin. Mi prefere rezignus al li tutan manon el la miaj. Sed li jam foriris ekster revokeblon, foriris por ĉiam.

— Jes, — diris Frodo. — Sed ĉu vi memoras la vortojn de Gandalfo: *Eble eĉ Golumo havas ankoraŭ ionfarotan*? Sen li, Sam, mi ne povus detrui la Ringon. La Komisio estintus vana, eĉ en la fina fino. Do ni pardonu lin! Ĉar la Komisio estas plenumita, kaj nun finiĝis ĉio. Mi ĝojas, ke vi estas kun mi. Ĉi tie, je la fino de ĉio, Sam.

4

La kampo de Kormaleno

Ĉie ĉirkaŭ la montetoj ŝtormis la armeoj de Mordoro. La Komandantoj el la Okcidento ekdronis en amasiĝinta maro. La suno brilis ruĝe, kaj sub la flugiloj de la nazguloj la ombroj de morto falis malhele sur la teron. Aragorno staris sub sia standardo, silenta kaj severa, kvazaŭ perdita en pensoj pri pasintaĵoj aŭ foraĵoj; sed liaj okuloj brilis kiel steloj, kiuj des pli helas, ju pli la nokto profundiĝas. Sur la montetosupro staris Gandalfo, kaj li estis blanka kaj malvarma kaj falis sur lin neniu ombro. La atako de Mordoro alteriĝis ondsimile sur la sieĝataj montetoj, voĉoj muĝis kvazaŭ tajdo inter la vrako kaj klakego de armiloj.

Gandalfo ekmoviĝis, kvazaŭ al liaj okuloj estus liverita ia vizio; kaj li turnis sin, retrorigardante norden, kie la ĉielo estis pala kaj klara. Tiam li levis siajn manojn kaj kriis per forta voĉo sonoranta super la bruego:

— La agloj venas!

Kaj multaj voĉoj respondis kriante:

— La agloj venas! La agloj venas!

La armeoj de Mordoro suprenrigardis kaj scivolis pri la signifo de tiu signo.

Venis Gvajhiro la Ventmastro, kaj ĝia frato Landrovalo, plej elstaraj el ĉiuj agloj de la nordo, plej potencaj el la posteuloj de maljuna Torondoro, kiu konstruis siajn nestejojn sur la nealireblaj montpintoj de la Ĉirkaŭantaj Montoj, kiam junis Mez-Tero. Malantaŭ ili en longaj rapidaj linioj venis ĉiuj iliaj vasaloj el la norda montaro, hastante laŭ plifortiĝanta vento. Rekte suben kontraŭ la nazguloj ili direktiĝis, plonĝante subite el la plialta aero kaj la reblovo de iliaj larĝaj flugiloj, kiam ili trapasis, similis uraganon.

Sed la nazguloj turniĝis kaj fuĝis, kaj malaperis en la ombrojn de Mordoro, aŭdinte subitan teruran alvokon el la Malhela Turego; kaj ĝuste tiumomente tremegis ĉiuj armeoj de Mordoro, dubemo kroĉis iliajn korojn, ilia ridado ĉesis, iliaj manoj skuiĝis, kaj iliaj membroj malrigidiĝis. La Potenco, kiu pelis ilin antaŭen kaj plenigis ilin de malamo kaj furiozo, ŝanceliĝis, ĝia volo estis forigita el ili; kaj nun rigardante en la okulojn de siaj malamikoj, ili vidis lumon mortminacan kaj ektimis.

Tiam ĉiuj Komandantoj el la Okcidento laŭte kriis, ĉar iliajn korojn plenigis nova espero meze de la mallumo. El la sieĝataj montetoj, kavaliroj de Gondoro, rajdistoj de Rohano, dunadanoj el la nordo, dense ordigitaj

trupoj, peliĝis kontraŭ siajn ŝanceliĝajn kontraŭulojn, breĉante la premadon per la ŝovado de koleraj lancoj. Sed Gandalfo levis siajn brakojn kaj vokis denove per la klara voĉo:

— Haltu, Batalantoj de l' Okcidento! Haltu atende! Jen estas la horo de l' destino.

Kaj ĝuste dum li parolis, la tero balanciĝis sub iliaj piedoj. Poste, altiĝante rapide, fore super la Turegoj de l' Nigra Pordego, alte super la montoj, granda soranta mallumo saltis en la ĉielon, fajre flagrante. La tero ĝemegis kaj tremis. La Turegoj de la Dentoj balanciĝis, ŝanceliĝis kaj falis; la fortika remparo diseriĝis; la Nigra Pordego ĵetite ruiniĝis; kaj de fore, jen mallaŭte, jen plifortiĝante, jen suprenirante al la nuboj venis tambura murmurego, muĝo, longa eĥanta ruliĝo de pereiga bruo.

— La regno de Saŭrono estas finita! — diris Gandalfo. — La Ringoportanto plenumis sian Komision.

Kiam la Komandantoj rigardis suden al Mordoro, al ili ŝajnis, ke, nigra antaŭ la nuba mortotuko, leviĝis enorma ombrofiguro, nepenetrebla, fulmkronita, pleniganta la tutan ĉielon. Grandega ĝi baŭmis super la mondo, kaj etendis al ili vastan minacan manon, teruran sed senfortan: ĉar dum ĝi kliniĝis super ili, trafis ĝin forta vento, kaj ĝi estis tute forblovita, kaj ĝi forpasis; kaj poste ĉio silentiĝis.

La Komandantoj klinis siajn kapojn; kaj kiam ili denove suprenrigardis, jen! Iliaj malamikoj fuĝadis, kaj la potenco de Mordoro disiĝadis kvazaŭ polvo en la vento. Samkiel kiam morto trafas la ŝvelintan kovantaĵon, kiu loĝas en ilia rampa teramaso kaj subpremas ilin ĉiujn, formikoj ekvagas sensence kaj sencele kaj poste feble mortas, tiel la kreitoj de Saŭrono, ĉu orko aŭ trolo aŭ besto ensorĉita, kuris tien-reen malracie; kaj iuj mortigis sin, aŭ ĵetis sin en putojn, aŭ fuĝis ululante reen por kaŝiĝi en truoj kaj malhelaj senlumejoj malproksimaj de la espero.

Sed la homoj el Rhuno kaj el Harado, orientuloj kaj suduloj, vidis la ruiniĝon de sia milito kaj la grandajn majestecon kaj gloron de la Komandantoj el la Okcidento. Kaj tiuj, kiuj plej profunde kaj plej longe servadis la mison, malamegante la Okcidenton, kaj kiuj tamen estis homoj fieraj kaj kuraĝaj, siavice nun kunigis sin por lasta kontraŭstaro en senespera batalo. Sed la plejparto fuĝis orienten laŭ la eblecoj; kaj iuj ĵetis teren siajn armilojn kaj petis indulgon.

Tiam Gandalfo, lasante ĉiujn batalaferojn kaj komandadon al Aragorno kaj aliaj estroj, stariĝis sur la montetopinto kaj vokis; kaj suben al li venis la granda aglo, Gvajhiro la Ventmastro, kaj staris antaŭ li.

— Dufoje vi jam portis min, mia amiko Gvajhiro, — diris Gandalfo. — Trifoje pagos la tuton, se vi pretas. Vi ne trovos min ŝarĝo pli peza ol

kiam vi portis min el Zirak-Zigilo, kie mia malnova vivo forbrulis.

— Mi portus vin, — respondis Gvajhiro, — kien ajn vi volas, eĉ se vi estus kreita el ŝtono.

— Do venu, kaj via frato akompanu nin, kaj iu alia el via popolo, kiu plej rapidas! Ĉar ni bezonas rapidecon pli fortan ol iu ajn vento, superantan la flugilojn de la nazguloj.

— Blovas la norda vento, sed ni devancos ĝin, — diris Gvajhiro. Kaj ĝi levis Gandalfon kaj forrapidis suden, kaj kun ĝi iris Landrovalo kaj Meneldoro juna kaj rapidega. Kaj ili pasis super Uduno kaj Gorgoroto kaj vidis la tutan landon en ruino kaj tumulto sube, kaj antaŭ ili la Monton de Sorto flamanta, elverŝanta sian fajron.

— Mi ĝojas, ke vi estas ĉi tie kun mi, — diris Frodo. — Ĉi tie je la fino de ĉiuj aferoj, Sam.

— Jes, mi kunestas, mastro, — diris Sam, metante milde la vunditan manon de Frodo sur sian bruston. — Kaj vi kunestas kun mi. Kaj la vojaĝo finiĝis. Sed veninte laŭ tiu longa vojo, mi ne volas ankoraŭ rezigni. Tio ne karakterizas min, se vi komprenas.

— Eble ne, Sam, — diris Frodo, — sed ĝi karakterizas la mondajn aferojn. Esperoj velkas. Venas fino. Ni devos nun atendi nur tre mallonge. Ni estas perditaj en ruino kaj falado, kaj eskapo ne eblas.

— Nu, mastro, ni povus almenaŭ malproksimiĝi de ĉi tiu loko danĝera, de ĉi Fendaĵo de Destino, se tiel ĝi nomiĝas. Ĉu ne? Venu, sinjoro Frodo, ni subeniru per la pado, almenaŭ!

— En ordo, Sam. Se vi volas iri, ankaŭ mi venos, — diris Frodo; kaj ili stariĝis kaj iris malrapide suben laŭ la serpentuma vojo; kaj ĝuste kiam ili pasis al la trema subo de la Monto, fumego kaj vaporo elruktiĝis el Samato Naŭr, kaj la flanko de la konuso estis ŝirmalfermita, kaj grandega fajra vomaĵo ruliĝis en lanta tondra kaskado suben sur la orienta montoflanko.

Frodo kaj Sam ne plu povis iri. La lasta forto de iliaj mensoj kaj korpoj rapide malflusis. Ili atingis malaltan cindran monteton amasigitan ĉe la subo de la Monto; sed el tie ne plu estis eskapa vojo. Ĝi estis jam insulo, ne longe daŭronta, en la turmento de Orodruino. Ĉie ĉirkaŭe la tero gapis, kaj el la profundaj fendaĵoj kaj putoj suprensaltis fumo kaj fetoroj. Grandaj ŝiraĵoj malfermiĝis sur ĝia flanko. Lantaj riveroj da fajro subeniris la longajn deklivojn direkte al ili. Baldaŭ ili estos inunditaj. Faladis pluvo da varmegaj cindroj.

Ili staris nun; kaj Sam ankoraŭ tenante la manon de Frodo karesis ĝin. Li suspiris.

— Kian rakonton ni partoprenis, sinjoro Frodo, ĉu ne? — li diris. — Mi tre ŝatus aŭskulti ĝian rakontadon! Ĉu vi opinias, ke oni diros: “Nun venas

la rakonto pri Naŭfingra Frodo kaj la Ringo de l' Destino"? Kaj tiam ĉiuj silentiĝos, kiel ni silentiĝis, kiam en Rivendelo oni rakontis al ni la historion pri Unumana Bereno kaj la Juvelego. Mi ŝatus aŭdi tion! Kaj mi scivolas, kiel ĝi daŭros post nia parto.

Sed ankaŭ dum li parolis tiel, por forbari timon ĝis la lasta momento, liaj okuloj plu vagadis norden, norden rekte kontraŭ la vento, ĝis kie la fora ĉielo estis klara, dum la malvarma blovado, fortiĝante al uragano, retropelis la mallumon kaj la ruiniĝon de la nuboj.

Kaj Gvajhiro ekvidis ilin per siaj akraj forvidaj okuloj, kiam laŭ la ventodirekto ĝi venis, kaj riskante la grandan danĝeron de la ĉielo ĝi cirkloflugis en la aero: du etajn malhelajn figurojn, forlasitajn, man-en-mane sur monteto, dum la mondo skuiĝis sub ili, kaj anhelis, kaj riveroj da fajro proksimiĝis. Kaj ĝuste kiam ĝi ekvidis ilin kaj zomis suben, ĝi vidis ilin fali, elĉerpitajn, aŭ sufokitajn de fumoj kaj varmego, aŭ finfine faligitajn de malespero, kaŝantajn de morto siajn okulojn.

Flank-al-flanke ili kuŝis; kaj suben plonĝis Gvajhiro, kaj suben venis Landrovalo kaj rapida Meneldoro; kaj dumsonĝe, ne sciante pri la sorto, kiu trafis ilin, la vagantoj estis levitaj kaj portitaj malproksimen el la mallumo kaj la fajro.

Kiam Sam vekiĝis, li konstatis, ke li kuŝas sur mola lito, sed super li milde balanciĝis larĝaj fagobranĉoj, kaj tra ties junaj folioj ekbrilis sunlumo, verdo kaj oro. La tuta aero estis plena de dolĉa intermiksita parfumo.

Li memoris tiun aromon: la dolĉodoro de Itilio. "Mi estu benata! Kiom longe mi dormis?" — li pensis, ĉar la aromo reportis lin al la tago, kiam li bruligis sian etan fajron sub la sunumita herbamaso; kaj momente ĉio alia el la intertempo foris de la vekiĝa memoro. Li streĉis sin kaj profunde enspiris.

— Vidu, kiun sonĝon mi spertis! — li murmuris. — Mi ĝoje vekiĝas! Li eksidis, kaj tiam li vidis, ke Frodo kuŝas apude kaj dormas trankvile kun unu mano malantaŭ la kapo, kaj la alia ripozanta sur la litkovrilo. Tiu estis la dekstra mano, kaj mankis la longa fingro. Plena rememoro inundis Samon, kaj li kriis laŭte:

— Ne temas pri sonĝo! Do kie mi estas? Kaj voĉo mallaŭte parolis malantaŭ li:

— En la lando Itilio, kaj sub zorgo de la Reĝo; kaj tiu atendas vin.

— Gandalfo stariĝis antaŭ li, blankvestita, kun barbo brilanta kiel pura neĝo en la palpebrumado de la folia sunlumo. — Nu, sinjoro Samsaĝo, kiel vi sentas vin? — li demandis.

Sed Sam kliniĝis malantaŭen, kaj gapis kun la buŝo malfermita, kaj momente, inter miro kaj ĝojego, li ne povis respondi. Fine li eligis:

— Gandalfo! Mi supozis vin morta! Sed tiam mi supozis min mem morta. Ĉu ĉio trista estas malveriĝonta? Kio okazis al la mondo?

— La Granda Ombro foriris, — diris Gandalfo, kaj poste li ridis, kaj la sono similis muzikon, aŭ akvon en lando malsekega; kaj kiam li aŭskultis, penso venis al Sam en la kapon, ke ridadon, la puran sonon de gajeco, li ne aŭdis jam dum tagoj nekalkuleblaj. Ĝi trafis liajn orelojn kiel eĥo de ĉiuj ĝojoj, kiujn li iam ajn spertis. Sed li mem abunde eklarmis. Poste, kiel dolĉa pluvo preterpasas sur printempa vento kaj la suno pli klare ekbrilas, lia larmado ĉesis, kaj lia ridado fontanis, kaj ridante li salte ellitiĝis.

— Kiel mi sentas min? Nu, mi ne scias, kiel diri tion, — li flirtigis siajn brakojn en la aero. — Mi sentas min kiel printempo post la vintro, kaj sunlumo sur la folioj; kaj kiel trumpetoj kaj harpoj kaj ĉiuj kantoj, kiujn mi iam ajn aŭdis! — Li ĉesis kaj returnis sin al sia mastro.

— Sed kiel fartas sinjoro Frodo? ĉu ne domaĝe pri lia kompatinda mano? Sed espereble li bonfartas rilate la ceteron. Li travivis tempon kruelan.

— Jes, mi bonfartas rilate la ceteron, — diris Frodo, sidiĝante kaj siavice ridante. — Mi reendormiĝis atendante vin, Sam, vi dormema kapo. Mi vekiĝis frue hodiaŭ matene, kaj jam devas esti tagmezo.

— Ĉu tagmezo? — diris Sam, provante kalkuli. — Mezo de kiu tago?

— La dek-kvara de la Nova Jaro, — diris Gandalfo, — aŭ, se vi volas, la oka tago de aprilo laŭ la Provinca kalkulo[12]. Sed en Gondoro la Nova Jaro ĉiam komenciĝos je la dudek-kvina de marto, kiam falis Saŭrono, kaj kiam vi estis eligita el la fajro al la Reĝo. Li vartis vin, kaj nun li vin atendas. Vi manĝos kaj trinkos ĉe li. Kiam vi estos pretaj, mi kondukos vin al li.

— Ĉu la Reĝo? Kiu reĝo, kaj kiu li estas?

— La Reĝo de Gondoro kaj Mastro de la Okcidentaj Landoj. Li reprenis sian tutan antikvan regnon. Li rajdos baldaŭ al sia kronado, sed li atendas vin.

— Kiel ni vestos nin? — diris Sam, ĉar li povis vidi nur la malnovajn kaj ĉifitajn vestaĵojn, en kiuj li vojaĝis, kuŝantajn faldite sur la tero apud iliaj litoj.

— En la vestaĵoj de via vojaĝo, — diris Gandalfo. — Neniuj silkaĵoj kaj linaĵoj, nek ajna armaĵo aŭ heraldiko, povus esti pli honorindaj. Sed poste ni vidos.

Kiam la hobitoj estis lavitaj kaj vestitaj, kaj manĝis iomete, ili sekvis Gandalfon. Ili elpaŝis el la faglaŭbo, en kiu ili kuŝadis, kaj pasis al longa verda razeno, ardanta en la sunlumo, borderita de majestaj malhelfoliaj arboj ŝarĝitaj je skarlataj floroj. Malantaŭe ili aŭdis la sonon de falanta

akvo, kaj antaŭ ili subenfluis rivereto inter florantaj teramasetoj, ĝis ĝi atingis verdan boskon ĉe la razena ekstremo kaj poste pluiris sub arkaĵo de arboj, tra kiu ili vidis la ekbrilon de akvo en la foro.

Kiam ili alvenis la malfermejon en la bosko, ili vidis surprizite kavalirojn en hela maŝarmaĵo kaj altajn gardistojn en arĝento kaj nigro, kiuj salutis ilin honore kaj riverencis antaŭ ili. Kaj tiam iu blovis longan trumpeton, kaj ili pluiris tra la arbokoridoro apud la lirlanta rivereto. Tiel ili venis ĝis vasta verda tereno, kaj post ĝi estis larĝa rivero en arĝenta nebuleto, el kiu leviĝis longa arbokovrita insuleto, kaj multaj ŝipoj estis apud ties bordoj. Sed sur la kampo, sur kiu ili nun staris, granda homamaso estis ordigita, laŭ vicoj kaj trupoj ekbrilantaj en la sunlumo. Kaj kiam la hobitoj proksimiĝis, glavoj estis elingigitaj, kaj lancoj estis skuataj, kaj kornoj kaj trumpetoj sonoris, kaj oni kriis multvoĉe kaj multlingve:

Vivu la duonuloj! Laŭdu ilin laŭdege!
Cuio i Pheriain anann! Aglar'ni Pheriannath!
Laŭdu ilin laŭdege, Frodon kaj Samsaĝon!
Daur a Berhael, Conin en Annûn! Eglerio!
Laŭdu ilin!
Eglerio!
A laita te, laita te! Andave laituvalmet!
Laŭdu ilin!
Cormacolindor, a laita tárienna!
Laŭdu ilin! La Ringoportintojn, laŭdu ilin laŭdege!

Kaj tiel kun sange ruĝiĝantaj vizaĝoj kaj mirbrilaj okuloj, Frodo kaj Sam antaŭeniris kaj vidis ke meze de la klama homamaso estis metitaj tri altaj seĝoj konstruitaj el verda gazono. Malantaŭ la dekstra seĝo flosis, blanka sur verdo, ĉevalego libere kuranta; maldekstre estis standardo, arĝenta sur bluo, ŝipo cignoprua naviganta surmare; sed malantaŭ la plej alta trono meze de ĉio, granda standardo estis dismontrata en la venteto, kaj tie floris blanka arbo sur kampo zibelkolora sub brila krono kaj sep briletantaj steloj. Sur la trono sidis viro maŝkirase vestita; granda glavo estis metita sur liaj genuoj, sed neniun kaskon li portis. Kiam ili proksimiĝis, li stariĝis. Kaj tiam ili rekonis lin malgraŭ la ŝanĝiĝo, tiel altan kaj belvizaĝan, reĝecan mastron de homoj, nigraharan kun la okuloj grizaj.

Frodo kuris renkonte al li, kaj Sam tuj sekvis.

— Nu, ĉu tio ne kronas ĉion! — li diris. — Jen Paŝegulo, aŭ mi daŭre dormas!

— Jes, Sam, estas Paŝegulo, — diris Aragorno. — Estas longa vojo, ĉu ne, de Brio, kie mia aspekto ne plaĉis al vi? Longa vojo por ĉiuj, sed la plej

malluma vojo estis via.

Kaj tiam, surprizante kaj tute konfuzante Samon, li genufleksis antaŭ ili; kaj, preninte ilin je la manoj, li kondukis ilin al la trono, kaj sidiginte ilin sur ĝin li turnis sin al la homoj kaj komandantoj apudaj kaj kriis tiel, ke lia voĉo sonoris tra la tuta amaso:

— Laŭdu ilin laŭdege!

Kaj post kiam krisaluto laŭtiĝis kaj formortis, je la lasta kaj kompleta kontentiĝo kaj pura ĝojo de Sam, menestrelo de Gondoro paŝis antaŭen, surgenuiĝis kaj petis permeson kanti. Kaj jen! tiu diris:

— Jen, estroj kaj kavaliroj kaj kuraĝuloj nehontigitaj, reĝoj kaj princoj, kaj bela popolo de Gondoro, kaj rajdistoj de Rohano, kaj vi filoj de Elrondo kaj dunadanoj el la nordo, kaj elfoj kaj gnomoj, kaj grandkoruloj el la Provinco, kaj ĉiuj liberuloj en la okcidento, jam aŭskultu mian kanton. Ĉar mi kantos al vi pri Frodo Naŭfingra kaj la Ringo de l' Destino.

Aŭdinte tion, Sam ridis laŭte pro pura ĝojo, kaj li stariĝis kaj kriis:

— Ho, grandaj gloro kaj majesto! Kaj ĉiuj miaj deziroj realiĝis! — kaj poste li ekploris.

Kaj la tuta amaso ridis kaj ploris, kaj meze de la ĝojo kaj larmoj aŭdiĝis la klara voĉo de la menestrelo, kiu leviĝis arĝente kaj ore, kaj ĉiuj personoj silentiĝis. Kaj li kantis al ili, jen en la elfa lingvo, jen en la lingvo de la okcidento, ĝis iliaj koroj, vunditaj per dolĉaj vortoj, tropleniĝis, kaj ilia ĝojo similis glavojn, kaj ili pasis enpense al regionoj, kie doloro kaj feliĉo fluas kune, kaj larmoj estas la vino mem de beniteco.

Kaj finfine, dum la suno dekliniĝis de tagmezo kaj la arbaj ombroj plilongiĝis, li ĉesis.

— Laŭdu ilin laŭdege! — li diris kaj surgenuiĝis.

Kaj tiam Aragorno stariĝis, kaj la tuta homamaso stariĝis, kaj ili pasis al pavilonoj pretigitaj, por manĝi kaj trinki kaj jubili dum la restaĵo de la tago.

Frodo kaj Sam estis kondukitaj aparte al tendo, kaj tie iliaj malnovaj vestaĵoj estis formetitaj, sed falditaj kaj honore formetitaj; kaj puraj subvestoj estis donitaj al ili. Poste venis Gandalfo kaj en liaj brakoj, mirige al Frodo, li portis la glavon kaj la elfan mantelon kaj la mitrilan tunikon, forpenitajn de li en Mordoro. Por Sam li alportis kirason el ommitaj maŝoj, kaj lian elfan mantelon tute riparitan post la suferitaj makuloj kaj difektoj, kaj li metis antaŭ ili du glavojn.

— Mi deziras neniun glavon, — diris Frodo.

— Sed ĉi-vespere vi devos porti almenaŭ unu, — diris Gandalfo. Tiam Frodo prenis la malgrandan glavon de Sam, kiu prenis ĝin en Cirito Ungol.

— La Pikilon mi donis al vi, Sam, — li diris.

— Ne, mastro! Sinjoro Bilbo donis ĝin al vi kune kun sia arĝenta

maŝkiraso; li ne ŝatus se iu alia nun portus ĝin.

Frodo cedis; kaj Gandalfo, kvazaŭ li estus ilia eskviro, genuiĝis kaj zonis ilin per glavbalteoj, kaj poste li leviĝis kaj surkapigis al ili arĝentajn cirkletojn. Kaj kiam ili estis bele vestitaj, ili iris al la festeno de la Reĝo, kaj ili sidiĝis ĉe ties tablo kun Gandalfo, kaj Eomero Reĝo de Rohano, kaj Princo Imrahilo kaj ĉiuj ĉefaj komandantoj; kaj tie estis ankaŭ Gimlio kaj Legolaso.

Sed kiam, post la Silenta Starado, vino estis alportita, envenis du eskviroj por servi al la reĝoj; aŭ tiaj ili ŝajnis. Unu estis vestita en la arĝento kaj zibelkoloro de la gardistoj de Minaso Tirit, kaj la alia en blanko kaj verdo. Sed Sam scivolis, kion faras knaboj tiel junaj en armeo de forteguloj. Tiam subite, kiam ili proksimiĝis kaj li povis klare vidi ilin, li ekkriis:

— Nu vidu, sinjoro Frodo! Rigardu tien! Nu, ĉu ne estas Grinĉjo, mi devus diri, sinjoro Peregrino Tjuko, kaj sinjoro Gaja! Kiom ili kreskis! Mi estu benata! Sed mi vidas, ke pli da historioj estas rakontotaj ol la nia.

— Tiel ja estas, — diris Grinĉjo, turniĝante al li. — Kaj ni baldaŭ komencos rakonti ilin, tuj post la fino de tiu ĉi festeno. Intertempe provu ĉe Gandalfo. Li ne estas tiel kaŝema, kiel antaŭe, kvankam nun li ridas pli ol li parolas. Provizore Gaja kaj mi estas okupataj. Ni estas kavaliroj de la Urbo kaj de Markio, kiel espereble vi rimarkis.

Finfine la ĝoja tago finiĝis; kaj kiam la suno estis for kaj la ronda luno rajdis malrapide super la nebuletoj de Anduino kaj traflagris la tremetantajn foliojn, Frodo kaj Sam sidis sub la flustrantaj arboj meze de la parfumo de bela Itilio kaj interparoladis ĝis profunda nokto kun Gaja, Grinĉjo kaj Gandalfo, kaj post kelka tempo aliĝis al ili Legolaso kaj Gimlio. Tie Frodo kaj Sam eksciis multon pri ĉio, kio okazis al la Kunularo post kiam ilia kunuleco estis rompita dum la misa tago ĉe Part Galeno apud la akvofalo Raŭroso; kaj daŭre estis multo demandinda kaj rakontinda.

Orkoj, parolantaj arboj, leŭgoj da herbo, galopaj rajdantoj, ekbrilantaj kavernoj, blankaj turegoj kaj oraj haloj, bataloj kaj velantaj ŝipegoj — ĉiuj ĉi pasis antaŭ la menso de Sam ĝis li perpleksiĝis. Sed meze de ĉiuj ĉi mirindaĵoj li revenis ĉiam al sia mirego pri la mezuro de Gaja kaj Grinĉjo; kaj li igis ilin stari dors-al-dorse kun Frodo kaj si mem. Li gratis sian kapon.

— Mi ne komprenas tion, ĉe via aĝo! — li diris. — Sed jen vi havas: vi estas je tri coloj pli altaj, ol vi devus esti, aŭ mi estas gnomo.

— Tio vi certe ne estas, — diris Gimlio. — Sed kion mi antaŭdiris? Mortemuloj ne povas trinkadi entajn trinkaĵojn kaj atendi neniom pli da rezulto ol okazas post glaso da biero.

— Ĉu entajn trinkaĵojn? — diris Sam. — Jen vi denove babilas pri entoj; sed kio ili estas mistifikas min. Vidu, necesos semajnoj por taksi ĉion

ĉi!

— Semajnoj efektive, — diris Grinĉjo. — Kaj poste oni devos enŝlosi Frodon en la turego de Minaso Tirit por skribe registri la tuton. Sen tio, li forgesos la duonon, kaj kompatinda maljuna Bilbo terure seniluziiĝos.

Finfine Gandalfo stariĝis.

— La manoj de la reĝo estas manoj kuracaj, karaj amikoj, — li diris. — Sed vi iris ĝis la sojlo de l' morto antaŭ ol li revokis vin, uzante sian tutan potencon, kaj sendis vin en la dolĉan dorman forgeson. Kaj malgraŭ tio, ke vi ja dormis longe kaj benite, tamen jam estas tempo dormi denove.

— Kaj ne nur Sam kaj Frodo, — diris Gimlio, — sed ankaŭ vi, Grinĉjo. Mi amas vin, se nur pro la penoj, kiujn vi trudis al mi, kiujn mi neniam forgesos. Mi ankaŭ ne forgesos, ke mi trovis vin sur la monteto de la lasta batalo. Sen la gnomo Gimlio vi estus perdita. Sed almenaŭ mi nun konas la aspekton de hobita piedo, eĉ kiam nur ĝi videblas sub amaso da kadavroj. Kaj kiam mi trenis de sur vi tiun kadavregon, mi estis certa, ke vi estas mortinta. Mi pretis elŝiri mian barbon. Kaj pasis nur unu tago, de kiam vi unuafoje ellitiĝis kaj ekpromenis. Al la lito nun vi iru. Kaj ankaŭ mi.

— Sed mi, — diris Legolaso, — promenos en la arbaroj de tiu ĉi bela lando, kio estos sufiĉa ripozo. En venontaj tagoj, se permesos mia elfa mastro, iuj el nia popolo translokiĝos ĉi tien; kaj post nia veno ĝi estos benata, dum kelka tempo. Dum kelka tempo: monato, vivdaŭro, cent homaj jaroj. Sed Anduino proksimas, kaj Anduino kondukas al la maro. Al la maro!

Al la mar', al la Maro! La mevoj nun kriĉas,
blovas la vento, kaj ŝaŭm' disflugiĝas.
En okcidento la suno sepultas.
Griza ŝip', griza ŝipo, ĉu nun vi aŭskultas
la voĉojn de mia jam fora samspeco?
l' arbaron mi lasos de mia juneco;
finiĝas la tagoj, kadukas la jaroj.
Velante mi solos sur vasto de l' maroj.
Longas la ondoj ĉe l' Lasta Marbordo,
dolĉas sur Fora Insul' voĉagordo,
en elfa hejmo, kiu la homojn forfermas,
kie folioj ne falas: elfa lando eternas!

Kaj tiel kantante Legolaso foriris suben laŭ la deklivo.

Poste foriris ankaŭ la aliaj, kaj Frodo kaj Sam iris al siaj litoj kaj ekdormis. Kaj en la mateno ili leviĝis denove en espero kaj trankvilo; kaj ili pasigis multajn tagojn en Itilio. Ĉar la Kampo de Kormaleno, kie la armeo

nun bivakis, estis proksima al Heneto Anun, kaj la rivereto, kiu fluis de ties akvofaloj estis aŭdebla nokte, inundanta suben tra ĝia rokpordo, kaj trapasis la florkovritajn herbokampojn en la tajdojn de Anduino apud la insulo Kairo Andros. La hobitoj vagis ie-tie vizitante denove la lokojn tra kiuj ili antaŭe pasis; kaj Sam esperis ekvidi, eble, en iu ombrejo de la arbaro aŭ sekreta maldensejo, la grandan olifonton. Kaj kiam li eksciis, ke ĉe la sieĝo de Gondoro tiuj bestoj estis multaj, sed ke ili estas ĉiuj detruitaj, li taksis tion ega perdo.

— Nu, oni ne povas okupi samtempe du lokojn, supozeble, — li diris. — Sed ŝajne mi multon maltrafis.

Dume la armeo pretigis sin por reiri al Minaso Tirit. Laculoj ripozis, kaj vunditoj estis kuracataj. Ĉar iuj multe batalis kontraŭ la restaĵon de la orientuloj kaj suduloj, ĝis ĉiuj estis subpremitaj. Kaj, plej laste el ĉiuj, revenis tiuj, kiuj foriris en Mordoron kaj detruis la fortikaĵojn en la nordo de tiu lando.

Sed fine, kiam proksimiĝis majo, la Komandantoj el la Okcidento ekvojaĝis denove; kaj ili surŝipiĝis kun ĉiuj siaj soldatoj, kaj ili navigis el Kairo Andros laŭ Anduino ĝis Osgiliado; kaj tie ili restis unu tagon; kaj la postan tagon ili venis al la verdaj kampoj de Pelenoro kaj ekvidis denove la blankajn turojn sub la alta Mindoluino, la ĉefurbo de la homoj de Gondoro, lasta memoraĵo de Okcidentio, kiu trapasis la mallumon kaj fajron al nova tago.

Kaj tie meze de la kampoj ili starigis siajn pavilonojn kaj atendis la matenon; ĉar estis la antaŭvespero de majo, kaj ĉe sunleviĝo la Reĝo eniros tra sia pordego.

5

La Reganto kaj la Reĝo

Super la ĉefurbo de Gondoro estis pendanta dubemo kaj granda timego. Bela vetero kaj klara sunlumo ŝajnis nur moki homojn, kies tagoj enhavis malmulte da espero, kaj kiuj atendis ĉiumatene novaĵojn pri misa sorto. Ilia mastro estis mortinta kaj enterigita, morta kuŝis la Reĝo de Rohano en ilia Citadelo, kaj la nova Reĝo veninta al ili nokte estis denove for al milito kontraŭ potencoj tro malhelaj kaj teruraj por konkero far ajna forto aŭ kuraĝo. Kaj neniu novaĵo venis. Post kiam la armeo forlasis la Morgulan Valon kaj laŭiris la vojon norden sub ombro de la montaro, neniu kuriero revenis, nek ajna onidiro pri tio, kio okazas en la kovanta oriento.

Kiam la Komandantoj estis for du tagojn, Damo Eovina ordonis, ke la virinoj, kiuj servis ŝin, alportu ŝian robaron, kaj ŝi rifuzis kontraŭdirojn, sed ellitiĝis; kaj kiam ili jam vestis ŝin kaj subtenis per lina skarpo ŝian brakon, ŝi iris al la estro de la Domoj de Kuracado.

— Sinjoro, — ŝi diris, — mi estas tre maltrankvila, kaj mi ne plu povas kuŝi nenion farante bradipe.

— Damo, — li respondis, — vi ankoraŭ ne resaniĝis, kaj al mi estis ordonite, ke mi flegu vin elstare zorgeme. Vi ne devis ellitiĝi dum ankoraŭ sep tagoj, aŭ tiel oni ordonis. Mi petas vin reiri.

— Mi estas kuracita, — ŝi diris, — kuracita almenaŭ korpe, escepte de mia maldekstra brako, kaj tiu estas ripozanta. Sed mi malsaniĝos denove, se nenio estas de mi farota. Ĉu ne venis militaj novaĵoj? La virinoj nenion povas sciigi al mi.

— Mankas novaĵoj. Krom ke la Mastroj rajdis al la Morgula Valo; kaj oni diris, ke la nova estro el la nordo komandas. Granda princo li estas, kaj kuraculo; kaj por mi estas ege strange, ke mano kuraca ankaŭ svingas glavon. Ne estas tiel nun en Gondoro, kvankam iam estis tiel, se veras la malnovaj rakontoj. Sed dum multaj jaroj ni, kuracistoj, celis nur fliki la ŝirojn faritajn de viroj glavaj. Tamen eĉ sen ili ni ankoraŭ havus sufiĉe da okupiĝo: la mondo sufiĉe plenas je damaĝoj kaj akcidentoj sen ke militoj plinombrigu ilin.

— Necesas nur unu malamiko por krei militon, ne du, sinjoro kuracestro, — respondis Eovina. — Kaj tiuj, kiuj ne posedas glavojn, povas tamen morti per ili. Ĉu vi volus, ke la homoj de Gondoro rikoltu por vi nur kuracherbojn, kiam la Malhela Mastro kunvokas armeojn? Kaj ne ĉiam

estas bone kuraciĝi korpe. Ankaŭ ne estas ĉiam mise morti en batalo, eĉ tre dolore. Se estus permesate al mi, en tiu ĉi malluma horo mi elektus tiun lastan.

La kuracestro rigardis ŝin. Alta ŝi staris, kun la okuloj brilaj en ŝia blanka vizaĝo, kaj mano pugnigita, kiam ŝi turnis sin kaj elrigardis tra lia fenestro, kiu malfermiĝis al la oriento. Li suspiris kaj skuis sian kapon. Post paŭzo ŝi turnis sin al li denove.

— Ĉu neniu tasko farendas? Kiu komandas en tiu ĉi Urbo?

— Mi ne scias precize. Tiuj aferoj ne estas miaj zorgoj. Iu marŝalo komandas la rajdistojn de Rohano, kaj Mastro Hurino, oni diris al mi, komandas la gondoranojn. Sed Mastro Faramiro estas laŭrajte la Reganto de la Urbo.

— Kie mi povos trovi lin?

— En tiu ĉi domo, damo. Li estas grave vundita, sed nun li progresas al sano. Sed mi ne scias...

— Ĉu vi ne volas konduki min al li? Tiam vi scios.

Mastro Faramiro promenis sola en la ĝardeno de la Domoj de Kuracado, kaj la sunlumo varmigis lin, kaj li sentis, ke nova vivo trakuras liajn vejnojn; sed lia koro estis peza, kaj li elrigardis orienten trans la murojn. Kaj veninte, la kuracestro prononcis lian nomon, kaj li turnis sin kaj ekvidis Eovinan, la Damon de Rohano; kaj kompato emociis lin, ĉar li vidis, ke ŝi estas vundita, kaj lia klarvido perceptis, ke ŝi malĝojas kaj maltrankvilas.

— Sinjoro, — diris la kuracestro, — jen estas Damo Eovina el Rohano. Ŝi rajdis kun sia reĝo kaj estis grave vundita, kaj loĝas nun sub mia prizorgo. Sed ŝi ne estas kontenta, kaj ŝi volas alparoli la Reganton de la Urbo.

— Ne miskomprenu min, sinjoro, — diris Eovina. — Malĝojigas min ne manko de prizorgo. Neniuj domoj povus esti pli belaj por tiuj, kiuj deziras kuraciĝon. Sed mi ne kapablas kuŝi bradipe, senokupe, enkaĝigite. Mi atendis morton en batalo. Sed mi ne mortis, kaj la batalo daŭras.

Pro gesto de Faramiro la kuracestro riverencis kaj foriris.

— Kion vi deziras, ke mi faru, damo? — demandis Faramiro. — Ankaŭ mi estas enkarcerigito de la kuracistoj. — Li rigardis ŝin, kaj ĉar li estis homo, kiun kompato profunde emociis, al li ŝajnis, ke ŝia belo kaj ŝia malĝojo trapikos lian koron. Kaj ŝi rigardis lin kaj vidis la serenan teneron en liaj okuloj, kaj tamen ŝi sciis, ĉar ŝi estis edukita inter militemaj viroj, ke jen estis iu, kiun neniu rohana rajdanto povus superi en batalo.

— Kion vi deziras? — li diris denove. — Mi faros tion, kion mi kapablas.

— Mi volas, ke vi ordonu al tiu kuracestro, ke li permesu al mi foriri,

— ŝi diris; sed kvankam ŝiaj vortoj estis daŭre fieraj, ŝia koro hezitis, kaj por la unua fojo ŝi dubis pri si mem. Ŝi konjektis, ke tiu altulo, samtempe severa kaj milda, eble taksos ŝin nur kaprica, kiel infanon al kiu mankas la mensa firmeco necesa por finplenumi taskon seninteresan.

— Mi mem estas sub lia prizorgo, — respondis Faramiro. — Mi ankaŭ ankoraŭ ne akceptis mian regantecon en la Urbo. Sed eĉ se mi tion farus, mi plu aŭskultus liajn konsilojn kaj ne kontraŭdirus lian volon pri liaj metiaj aferoj, krom pro iu forta bezono.

— Sed kuraciĝon mi ne deziras, — ŝi diris. — Mi deziras rajdi al la milito kiel mia frato Eomero, aŭ prefere kiel Reĝo Teodeno, ĉar li mortis kaj havas samtempe honoron kaj pacon.

— Estas tro malfrue, damo, por sekvi la Komandantojn, eĉ se vi disponus sufiĉan forton. Sed morto en batalo eble venos iam al ni ĉiuj, vole aŭ nevole. Vi estos pli bone preparita por fronti ĝin laŭ via maniero, se dum restas ankoraŭ tempo, vi faros laŭ la ordono de la kuracisto. Vi kaj mi, ni devas toleri pacience la horojn de atendado.

Ŝi ne respondis, sed kiam li rigardis ŝin, al li ŝajnis, ke io en ŝi moliĝis, kvazaŭ severa frosto cedus pro unua febla aŭguro de la printempo. Larmo aperis en ŝia okulo kaj ruliĝis laŭ ŝia vango, kvazaŭ brileta pluvero. Ŝia fiera kapo iomete kliniĝis. Poste mallaŭte, kvazaŭ ŝi pli parolus al si ol al li, ŝi diris:

— Sed la kuracistoj volas, ke mi kuŝu en la lito ankoraŭ sep tagojn. Kaj mia fenestro ne frontas orienten.

Nun ŝia voĉo estis tiu de fraŭlino juna kaj malĝoja. Faramiro ridetis, kvankam lian koron plenigis kompato.

— Ĉu via fenestro ne frontas orienten? — li diris. — Tion oni povas korekti. Tiurilate mi ordonos al la kuracestro. Se vi restos en tiu ĉi domo sub nia prizorgo, sinjorino, kaj ripozos, tiam vi promenos en tiu ĉi ĝardeno en la sunlumo, laŭ via volo; kaj vi rigardos orienten, kien iris ĉiuj niaj esperoj. Kaj ĉi tie vi trovos min promenanta kaj atendanta, kaj ankaŭ rigardanta orienten. Faciligus miajn zorgojn, se vi parolus al mi, aŭ promenus kun mi de tempo al tempo.

Tiam ŝi levis sian kapon kaj rigardis denove en liajn okulojn; kaj ŝia pala vizaĝo koloriĝis.

— Kiel mi faciligos viajn zorgojn, sinjoro? — ŝi demandis. — Kaj mi ne deziras la parolon de vivaj homoj.

— Ĉu vi volas akcepti mian malkaŝan respondon?

— Mi volas.

— Do, Eovina de Rohano. Mi diras al vi, ke vi estas bela. En la valoj de niaj montetoj estas floroj belaj kaj helaj, kaj fraŭlinoj eĉ pli belaj; sed ĝis

nun mi vidis en Gondoro nek floron nek fraŭlinon tiom belan kaj tiom malĝojan. Eble nur kelkaj tagoj restas antaŭ ol mallumo trafos nian mondon, kaj kiam ĝi venos, mi esperas fronti ĝin senŝancele; sed faciligus mian koron, se dum la suno ankoraŭ brilas, mi povus plu vidi vin. Ĉar vi kaj mi ambaŭ pasis sub la flugilojn de la Ombro, kaj la sama mano nin retiris.

— Ve, ne min, moŝto! — ŝi diris. — Ombro ankoraŭ kovras min. Ne atendu de mi kuracon! Mi estas ŝildoportantino kaj mia mano estas malmilda. Sed mi dankas vin almenaŭ pro tio, ke mi ne devos resti en mia ĉambro. Mi promenos libere dank' al la bonkoreco de la Reganto de la Urbo. — Kaj ŝi genufleksis antaŭ li kaj reiris en la domon. Sed Faramiro dum longa tempo promenis sola en la ĝardeno, kaj lia rigardo jam turniĝis prefere al la domo ol al la orientaj muroj.

Reveninte al sia ĉambro, li alvokis la kuracestron kaj aŭdis ĉion pri la Damo de Rohano, kion tiu povis rakonti.

— Sed sendube, mastro, — diris la kuracestro, — vi ekscius pli multe de la duonulo, kiu estas ĉe ni; ĉar li partoprenis la rajdadon de Reĝo Teodeno kaj estis kun la Damo en la fino, oni diras.

Kaj tiel Gaja estis sendita al Faramiro, kaj dum la tuta tago ili longe interparolis, kaj Faramiro eksciis multon, eĉ pli multon ol Grinĉjo vortigis; kaj li pensis, ke li jam iomete komprenas la malĝojon kaj maltrankvilon de Eovina el Rohano. Kaj dum la bela vespero Faramiro kaj Grinĉjo promenis en la ĝardeno, sed ŝi ne venis.

Sed matene, kiam Faramiro venis el la Domoj, li vidis ŝin, dum ŝi staris sur la muroj, kaj ŝi estis tute blankvestita, kaj brilis en la sunlumo. Kaj li vokis ŝin, kaj ŝi venis suben, kaj ili promenis sur la herbo aŭ sidis kune sub verda arbo, jen silente, jen parolante. Kaj ĉiun postan tagon ili faris simile. Kaj la kuracestro, rigardante tra sia fenestro, ĝojis en sia koro, ĉar li estis kuracisto, kaj liaj zorgoj malpeziĝis; kaj estis certe, ke, malgraŭ pezo de la timo kaj misaŭguro en la homaj koroj, tiu duopo el liaj vartatoj plu prosperis kaj ĉiutage plifortiĝis.

Kaj venis la kvina tago, post kiam Damo Eovina unuafoje iris al Faramiro; kaj ili denove staris kune sur la urba muro kaj rigardis. Ankoraŭ ne venis informoj, kaj ĉiuj koroj malhelis. Ankaŭ la vetero ne plu helis. Estis fride. Vento, kiu nokte estiĝis, jam akre blovis el la nordo, kaj ĝi plifortiĝadis; sed la ĉirkaŭaj terenoj aspektis grizaj kaj mornaj.

Ili estis vestitaj per varmaj roboj kaj pezaj manteloj, kaj super ĉio Damo Eovina portis bluan mantelegon el koloro de profunda somernokto, kaj ĉirkaŭ la orlo kaj la kolo sur ĝi estis arĝentaj steloj. Faramiro alportigis tiun robon kaj volvis ŝin per ĝi; kaj li opiniis, ke ŝi aspektas efektive bele kaj reĝinece, kiam ŝi staris tie apude. Tiu mantelego estis teksita por lia patrino,

Finduilasa el Amroto, kiu mortis juna, kaj por li ĝi estis nur memoro pri belo antaŭlonga kaj pri lia unua funebro; kaj ŝia robo ŝajnis al li vestaĵo taŭga por la belo kaj malĝojo de Eovina.

Sed nun ŝi frostotremis sub la stela mantelego, kaj ŝi rigardis norden, trans la grizaj proksimaj teroj, en la okulon de la malvarma vento, kie fore la ĉielo estis malmola kaj klara.

— Kion vi serĉas, Eovina? — demandis Faramiro.

— Ĉu ne la Nigra Pordego troviĝas tie fore? — ŝi diris. — Kaj ĉu ne li jam devis alveni tien? Pasis sep tagoj, de kiam li forrajdis.

— Sep tagoj. Sed ne pensu malbone pri mi, se mi diras al vi: ili havigis al mi samtempe ĝojon kaj doloron, kiujn mi ne supozis iam sperti. Ĝojon, vidante vin; sed doloron, ĉar nun la timo kaj dubo en tiu ĉi misa tempo iĝis efektive malhelaj. Eovina, mi ne volas, ke tiu ĉi mondo finiĝu nun, nek perdi tiel baldaŭ tion, kion mi trovis.

— Ĉu perdi tion, kion vi trovis, sinjoro? — ŝi respondis; sed ŝi rigardis lin serioze, kaj ŝiaj okuloj estis bonkoraj. — Mi ne scias, kion dum tiuj tagoj vi trovis, kion vi povus perdi. Sed vidu, amiko mia, pri tio ni ne parolu! Ni tute ne parolu! Mi staras ĉe iu terura rando, kaj en la abismo antaŭ miaj piedoj estas komplete mallume, sed ĉu estas ia lumo malantaŭ mi, mi ne povas scii. Ĉar mi ankoraŭ ne kapablas turniĝi. Mi atendas iun baton de la sorto.

— Jes, ni atendas sortobaton, — diris Faramiro. Kaj ili diris nenion plu; kaj ŝajnis al ili, starantaj sur la muro, ke la vento ĉesis, kaj la lumo forvelkis, kaj la suno estis malakrigita, kaj silentiĝis ĉiuj bruoj en la Urbo kaj en la ĉirkaŭa regiono: nek vento, nek voĉo, nek birda trilo, nek folia susuro, nek ilia propra spirado estis aŭdebla; la batado de iliaj koroj senmoviĝis. La tempo haltis.

Kaj dum ili staris tiel, iliaj manoj renkontiĝis kaj tenis sin reciproke, kvankam tion ili ne sciis. Kaj daŭre ili atendis nekonatan. Post iom da tempo ŝajnis al ili, ke super la firstoj de la foraj montoj leviĝis vasta montego da mallumo, baŭmante kiel ondo inundonta la mondon, kaj ĉirkaŭ ĝi fulmoj flagris; kaj poste tremego trakuris la teron, kaj ili sentis ŝanceliĝon de la muroj de la Urbo. Suspireca sono leviĝis el ĉiuj ĉirkaŭaj terenoj; kaj iliaj koroj subite ekbatis denove.

— Tio memorigas min pri Numenoro, — diris Faramiro, kaj miris aŭdante sin paroli.

— Ĉu pri Numenoro?

— Jes, pri la lando Okcidentio, kiu dronis, kaj pri la malhela ondego grimpanta super la verdajn landojn kaj super la montojn, kaj proksimiĝanta, mallumo neeskapebla. Mi ofte sonĝas pri tio.

— Do vi opinias, ke la Mallumo venas? Mallumo neeskapeblas? — diris Eovina kaj subite proksimiĝis al li.

— Ne, — diris Faramiro, rigardante ŝian vizaĝon. — Tio estis nur bildo en la menso. Mi ne scias, kio okazas. La racio de mia maldorma menso sciigas al mi, ke okazis granda misaĵo, kaj ni staras ĉe la fino de tagoj. Sed mia koro diras, ke ne; kaj ĉiuj miaj membroj malpezas, kaj venas al mi espero kaj ĝojo, kiujn neniu racio povas malakcepti. Eovina, Blanka Damo de Rohano, en tiu ĉi horo mi ne kredas, ke iu ajn mallumo estos daŭra!

Li kliniĝis kaj kisis ŝian frunton.

Kaj tiel ili staris sur la muroj de la ĉefurbo de Gondoro, kaj ventego ekestis kaj blovis, kaj iliaj haroj, korvokoloraj kaj oraj, elstriis intermiksiĝe en la aero. Kaj la Ombro foriris, kaj la suno senvualiĝis, kaj la lumo elsaltis; kaj la akvo de Anduino ekbrilis kiel arĝento, kaj en ĉiuj doraoj de la Urbo la homoj ekkantis pro la ĝojo, kiu leviĝis en iliaj koroj el kiu fonto, ili ja ne sciis.

Kaj antaŭ ol la suno multe posttagmezis, el la oriento alflugis granda aglo, kiu alportis novaĵojn preteresperajn de la Mastroj de l' Okcidento, kriante:

Kantu jam, popolo de l' Turego Anoro,
ĉar la Regno de Saŭrono finiĝis por ĉiam,
kaj la Malhela Turego estas detruita.

Kantu kaj ĝoju, popolo de l' Turego Garda,
ĉar via vaĉado ne estis vana,
kaj rompitas la Nigra Pordego,
via Reĝo trapasis,
kaj li estas venkinta.

Kantu ĝojplene, infanoj de l' okcidento,
ĉar via Reĝo venos denove,
kaj li loĝados inter vi
ĉiujn tagojn de via vivo.

Kaj la Arbo velkinta estos renovigita,
kaj li plantos ĝin en la lokoj altaj,
kaj la Urbo estos benita.

Kantu la tuta popolo!

Kaj la homoj kantis sur ĉiuj vojoj de la Urbo.

La sekvintaj tagoj estis oraj, kaj printempo kaj somero kuniĝis kaj jubilis kune sur la kampoj de Gondoro. Kaj informoj jam venis per rapidaj

rajdantoj el Kairo Andros pri ĉio farita, kaj la Urbo pretiĝis por la alveno de la Reĝo. Grinĉjo estis alvokita kaj forrajdis kun la furgonoj, kiuj portis varprovizojn al Osgiliado kaj de tie al Kairo Andros. Sed Faramiro ne iris, ĉar jam kuracita li surprenis sian aŭtoritatecon kaj la regantecon, kvankam nur por mallonga daŭro, kaj lia devo estis prepari por iu, kiu anstataŭos lin.

Ankaŭ Eovina ne foriris, kvankam ŝia frato sendis mesaĝon, kun peto ke ŝi venu al la kampo de Kormaleno. Kaj Faramiro miris pro tio, sed li malofte vidis ŝin, estante okupata pri aliaj aferoj; kaj ŝi plu loĝis en la Domoj de Kuracado kaj promenis sola en la ĝardeno, kaj ŝia vizaĝo denove paliĝis, kaj ŝajnis, ke en la tuta Urbo nur ŝi malsanetas kaj malĝojas. Kaj la kuracestro estis ĉagrenita, kaj li rakontis pri tio al Faramiro.

Poste Faramiro venis serĉante ŝin, kaj ankoraŭfoje ili staris kune sur la muro; kaj li diris al ŝi:

— Eovina, kial vi prokrastas ĉi tie, kaj ne iras al la jubilado en Kormaleno post Kairo Andros, kie via frato atendas vin?

— Ĉu vi ne scias? — ŝi diris. Sed li respondis:

— Povas esti du kialoj, sed mi ne scias, kiu el ili estas vera.

— Mi ne emas ludi per enigmoj, — ŝi diris. — Parolu pli rekte.

— Do se tion vi volas, damo, — li diris, — vi ne foriras, ĉar alvokis vin nur via frato, kaj rigardi Mastron Aragorno, heredinton de Elendilo, dum lia triumfo jam ne havigus al vi ĝojon. Aŭ ĉar ne foriris mi, kaj vi plu deziras esti proksima al mi. Kaj eble pro ambaŭ tiuj kialoj, kaj vi mem ne scias elekti inter ili. Eovina, ĉu vi ne amas min, aŭ ne volas tion?

— Mi volis esti amata de alia, — ŝi respondis. — Sed mi deziras kompaton de neniu.

— Tion mi scias. Vi deziris la amon de Mastro Aragorno. Ĉar li estis alta kaj potenca, kaj vi volis havi renomon kaj gloron kaj esti levita super la mizerulojn kiuj rampas sur la tero. Kaj li ŝajnis al vi admirinda, kiel granda komandanto eble ŝajnas al juna soldato. Ĉar tia li estas, sinjoro inter la batalantoj, la plej granda nun ekzistanta. Sed kiam li donis al vi nur komprenemon kaj kompaton, tiam vi deziris havi nenion, escepte de kuraĝa morto en batalo. Rigardu min, Eovina!

Kaj Eovina rigardis Faramiron longe kaj senŝancele; kaj Faramiro diris:

— Ne malestimu kompaton, kiu estas donaco de milda koro, Eovina! Sed mi ne proponas al vi mian kompaton. Ĉar vi estas damo alta kaj brava kaj mem akiris renomon, kiu ne estas forgesota; kaj vi estas damo bela, mi opinias, kion eĉ la vortoj de la elfa lingvo ne sufiĉe priskribas. Kaj mi amas vin. Iam mi kompatis vian malĝojon. Sed nun, eĉ se vi estus sentrista, sen timo aŭ ajna manko, se vi estus la feliĉa reĝino de Gondoro, mi ankoraŭ amus vin. Eovina, ĉu vi ne amas min?

Tiam la koro de Eovina ŝanĝiĝis, aŭ eble ŝi finfine komprenis ĝin. Kaj subite forlasis ŝin vintro, kaj la suno brilis al ŝi.

— Mi staras en Minaso Anor, la Turego de la Suno, — ŝi diris. — Kaj jen! La Ombro foriris! Mi ne plu estos ŝildoportantino, nek konkuros kun la grandaj rajdistoj, nek ĝojos nur pri kantoj de mortigo. Mi estos kuracistino, kaj amos ĉion, kio kreskas kaj ne estas malfekunda. — Ŝi denove rigardis Faramiron. — Mi ne plu deziras esti reĝino.

Tiam Faramiro ridis gaje.

— Tio estas bona, — li diris, — ĉar Reĝo mi ne estas. Sed mi edzinigos la Blankan Damon de Rohano, se tion ŝi volos. Kaj se ŝi tion volas, ni do transiru la riveron kaj en tagoj pli feliĉaj ni loĝu en la bela Itilio kaj kreu tie ĝardenon. Ĉio kreskos en ĝojo tie, se venos la Blanka Damo.

— Ĉu do mi devos forlasi mian propran popolon, viro el Gondoro? — ŝi demandis. — Kaj ĉu vi volas, ke via fiera popolo diru pri vi: "Jen iras princo, kiu malsovaĝigis furiozan ŝildoportantinon el la nordo! Ĉu ne troviĝis elektinda virino el la Numenora raso?"

— Mi volas, — diris Faramiro kaj brakumis ŝin kaj kisis ŝin sub la sunluma ĉielo, kaj li tute ne ĝeniĝis pro tio, ke ili staras alte sur la muro kaj estas videblaj de multaj. Kaj multaj efektive vidis ilin kaj la lumon, kiu ĉirkaŭis ilin, kiam ili venis suben de la muroj kaj iris man-en-mane ĝis la Domoj de Kuracado.

Kaj al la kuracestro Faramiro diris:

— Jen Eovina, la Damo el Rohano, kaj nun ŝi estas kuracita. Kaj la kuracestro diris:

— Do mi liberigas ŝin el mia prizorgo kaj adiaŭas ŝin, kaj ŝi neniam denove suferu doloron aŭ malsanon. Mi rekomendas ŝin al prizorgo de la Reganto de la Urbo, ĝis revenos ŝia frato.

Sed Eovina diris:

— Tamen nun, havante permeson foriri, mi volas resti. Ĉar tiu ĉi Domo iĝis por mi la plej benita el ĉiuj loĝejoj.

Kaj ŝi restis tie, ĝis venis Reĝo Eomero.

Ĉio estis nun pretigata en la Urbo; kaj formiĝis granda homamaso, ĉar la novaĵo disvastiĝis en ĉiuj regionoj de Gondoro, de Min-Rimono ĝis eĉ Pinato Gelin kaj la malproksimaj marbordoj. Kaj ĉiuj, kiuj povis veni al la Urbo, venis rapide. Kaj la Urbo denove pleniĝis de virinoj kaj belaj infanoj, kiuj reiris al siaj domoj ŝarĝite de floroj; kaj el Dol Amroto venis harpistoj, kiuj plej lerte harpis en la tuta lando; kaj troviĝis ludantoj de vjoloj kaj de flutoj kaj de arĝentaj trumpetoj kaj klarvoĉaj kantistoj el la valoj de Lebenino.

Finfine venis vespero, dum kiu de la muroj videbliĝis la pavilonoj, kaj

tra la tuta nokto lanternoj lumis, dum la homoj atendis la tagiĝon. Kaj kiam la suno leviĝis en la klara mateno super la orientajn montojn, sur kiuj ne plu kuŝis ombroj, tiam ĉiuj sonoriloj sonoris, kaj ĉiuj standardoj malvolviĝis kaj flirtis en la vento; kaj sur la Blanka Turo de la Citadelo la standardo de la Regantoj, hele arĝenta kiel neĝo en la sunlumo, surhavante nek blazonon nek devizon, estis lastfoje hisita super Gondoro.

Nun la Komandantoj de l' Okcidento kondukis sian armeon al la Urbo, kaj la homoj vidis ilin avancantaj vicon post vico, flagrantaj kaj ekbrilantaj en la sunleviĝo kaj arĝente muarantaj. Kaj tiel ili alvenis antaŭ la Pordegon kaj haltis je mejl-okono antaŭ la muroj. Ĝis nun neniu pordoklapo estis restarigita, sed barilo estis metita trans la enirejoj de la Urbo, kaj tie staris armitoj en arĝento kaj nigro kun elingigitaj longaj glavoj. Antaŭ la barilo staris Reganto Faramiro kaj Hurino, Gardisto de la Ŝlosiloj, kaj aliaj komandantoj de Gondoro, kaj Damo Eovina el Rohano kun marŝalo Elfhelmo kaj multaj kavaliroj de Markio; kaj ambaŭflanke de la Pordego estis granda amaso da belaj homoj en buntaj vestaĵoj kaj florgirlandoj.

Do nun estis larĝa spaco antaŭ la muroj de Minaso Tirit, kaj ĝin enfermis ĉiuflanke la kavaliroj kaj soldatoj de Gondoro kaj Rohano, kaj la popolo de la Urbo kaj el ĉiuj landopartoj. Ĉiuj silentiĝis, kiam el la amaso enpaŝis la dunadanoj en arĝento kaj grizo; kaj antaŭ ili venis malrapide Mastro Aragorno. Li estis vestita en nigra maŝarmaĵo ornamita per arĝento, kaj li portis longan mantelon el pura blanko agrafita ĉe la gorĝo per verda juvelo defore brilanta; sed lia kapo estis nekovrita. Kun li estis Eomero el Rohano, kaj Princo Imrahilo, kaj Gandalfo tute blankvestita, kaj kvar etaj figuroj, pri kiuj miris multaj homoj.

— Ne, kuzino! Ili ne estas knaboj, — diris Joreta al sia parencino el Imloto Melui, kiu staris apude. — Ili estas *Perianoj* el la fora lando de la Duonuloj, kie ili estas laŭdire tre famaj princoj. Tion mi scias, ĉar mi vartis unu el ili en la Domoj. Ili estas malgrandaj, sed ili estas bravaj. Vidu, kuzino, unu el ili iris kun nur sia eskviro en la Nigran Landon kaj batalis tie sola kontraŭ la Malhela Mastro mem, kaj fajrigis ties Turegon, se tion vi povas kredi. Almenaŭ tion oni rakontas en la Urbo. Temas verŝajne pri tiu, kiu marŝas kun nia Elfŝtono. Ili estas koraj amikoj, mi aŭdis. Nu, li estas mirindulo, Mastro Elfŝtono: ne tro molparola, certe, sed li havas koron oran, kiel oni diras, kaj li havas manojn kuracajn. "La manoj de la Reĝo estas manoj de kuracisto", mi diris; kaj tiamaniere ĉio estis retrovita. Kaj Mitrandiro diris al mi: "Joreta, la homoj longe memoros viajn vortojn", kaj...

Sed al Joreta ne estis permesate daŭrigi la klarigon al la kampara parencino, ĉar sonoris trumpeto, kaj sekvis kompleta silento. Tiam el la

Pordego venis Faramiro kaj Hurino kun la Ŝlosiloj, kaj neniuj aliaj, krom ke malantaŭ ili marŝis kvar viroj en la altaj kaskoj kaj armaĵo de la Citadelo, kaj tiuj portis grandan keston el nigra *lebetrono* ligita per arĝento.

Faramiro renkontis Aragornon meze de la kunvenintoj, kaj li genuiĝis, kaj diris:

— La lasta Reganto de Gondoro petas permeson transdoni sian oficon.

Li etendis blankan bastoneton, sed Aragorno akceptis la bastoneton kaj redonis ĝin, dirante:

— Tiu ofico ne finiĝis, kaj ĝi estos via kaj posedaĵo de viaj heredontoj, tiel longe, kiel daŭros mia nasklinio. Plenumu do vian oficon!

Faramiro stariĝis kaj parolis klarvoĉe:

— Homoj de Gondoro, aŭdu nun la Reganton de la Regno! Jen! Finfine venis iu por pretendi la reĝecon. Jen estas Aragorno, filo de Aratorno, ĉefo de la Dunadanoj el la Nordo, Komandanto de la Armeo de l' Okcidento, portanto de la Glavo Reforĝita, venkinto en batalo, kies manoj havigas kuracadon, la Elfŝtono, Elesaro el la linio de Valandilo, filo de Isilduro, Elendila filo el Numenoro. Ĉu li estu la Reĝo kaj eniru en la Urbon kaj loĝadu tie?

Kaj la tuta homamaso kaj la tuta popolo kriis *jes* kvazaŭ unuvoĉe. Kaj Joreta diris al sia parencino:

— Tio ĉi estas nur ceremonio tia, kian ni havas en la Urbo, kuzino; ĉar li jam eniris, kiel mi klarigis al vi; kaj li diris al mi... — Kaj ŝi denove devis silentiĝi, ĉar Faramiro denove ekparolis.

— Homoj el Gondoro, la analistoj diras, ke en la malnova tempo la reĝo kutime ricevis la kronon de sia patro, antaŭ ol tiu mortis; aŭ se tio ne eblis, li iris sola kaj akceptis ĝin el la manoj de sia patro en la tombo, kie tiu estis kuŝigita. Sed pro tio, ke nun la aferoj devas esti alimaniere aranĝitaj, per la aŭtoritato de la Reganto mi hodiaŭ portigis ĉi tien el Rat Dineno la kronon de Earnuro, la lasta Reĝo, kies tagoj pasis dum la epoko de niaj prapatroj antaŭ longe.

La gardistoj paŝis antaŭen, kaj Faramiro malfermis la keston kaj levis la antikvan kronon. Ĝi estis formita simile al la kaskoj de la citadelaj gardistoj, sed ĝi estis pli impona, kaj ĝi estis tute blanka, kaj la aloj ambaŭflanke estis faritaj el perlamoto kaj arĝento simila al marbirdaj flugiloj, ĉar ĝi estis la emblemo de la reĝoj, kiuj venis transmaren. Sep gemoj diamantaj estis enfiksitaj en la cirkleto, kaj sur ĝia supro estis fiksita unu juvelo, kies lumo supreniris kvazaŭ flamo.

Tial Aragorno prenis la kronon, levis ĝin alte kaj diris:

— *Et Eärello Endorenna utúlien. Sinome maruvan ar Hildinyar tenn' Ambar-metta*!

Kaj tiuj estis la vortoj, kiujn Elendilo parolis, kiam li alvenis el la maro sur flugiloj de la vento: “El la Granda Maro al Mez-Tero mi venis. En tiu ĉi loko loĝados mi kaj miaj heredontoj, ĝis la fino de la mondo”.

Poste, mirigante multajn, Aragorno ne surkapigis la kronon, sed redonis ĝin al Faramiro kaj diris:

— Per la penado kaj kuraĝo de multaj mi ricevas mian heredaĵon. Rekone de tio, mi deziras, ke la Ringoportinto alportu la kronon, kaj Mitrandiro metu ĝin sur mian kapon, se li konsentas; ĉar li estis la instiginto de ĉio plenumita, kaj lia estas tiu ĉi venko.

Tiam Frodo paŝis antaŭen kaj prenis de Faramiro la kronon kaj portis ĝin al Gandalfo; kaj Aragorno genuiĝis, kaj Gandalfo metis la Blankan Kronon sur lian kapon kaj diris:

— Nun venas la tagoj de la Reĝo, kaj ili estu benitaj, dum daŭros la regado de la valaroj!

Sed kiam Aragorno stariĝis, ĉiuj spektantoj rigardis lin silente, ĉar ŝajnis al ili, ke li estas rivelita al ili nun la unuan fojon. Alta kiel la pratempaj maraj reĝoj, li superis ĉiujn apudulojn. Multjarulo li ŝajnis, kaj tamen en la zenito de sia vivo; kaj saĝecon indikis lia frunto, kaj en liaj manoj estis forto kaj kuracemo, kaj lumo ĉirkaŭis lin. Kaj tiam Faramiro kriis:

— Vidu la Reĝon!

Kaj tiumomente ĉiuj trumpetoj estis blovataj, kaj Reĝo Elesaro eliris kaj alvenis la barilon, kaj Hurino kun la Ŝlosiloj forŝovis ĝin; kaj meze de la muziko de harpoj, vjoloj kaj flutoj kaj kantado de klaraj voĉoj la Reĝo trairis la florkovritajn vojojn kaj venis al la Citadelo kaj eniris; kaj la standardo de la Arbo kaj la Steloj estis malvolvita sur la plej alta turo, kaj komenciĝis la regado de Reĝo Elesaro, pri kiu rakontis multaj kantoj.

Dum lia epoko la Urbo estis pli ol iam ajn beligita, eĉ pli ol dum la tagoj de ĝia unua gloro; kaj ĝin plenigis arboj kaj fontanoj, kaj ĝiaj pordoj estis forĝitaj el mitrilo kaj ŝtalo, kaj ĝiaj stratoj estis pavimitaj je blanka marmoro; kaj la popolo de la Monto laboris en ĝi, kaj la popolo de l’ Arbaro ĝojis veni tien; kaj ĉio estis kuracita kaj riparita, kaj domoj estis plenigitaj de viroj kaj virinoj kaj la ridado de infanoj, kaj neniu fenestro estis blinda, nek iu ajna korto malplena; kaj post la fino de la Tria Epoko de la mondo en la nova tempo ĝi konservis la memoron kaj la gloron de la forpasintaj jaroj.

Dum la tagoj, kiuj sekvis lian kronadon, la Reĝo sidis sur sia trono en la Halo de la Reĝoj kaj anoncis siajn juĝojn. Kaj ambasadoroj venis de multaj landoj kaj popoloj, de l’ oriento kaj de la sudo, kaj de la limoj de Mornarbaro, kaj de Dunlando en la okcidento. Kaj la Reĝo pardonis tiujn orientulojn, kiuj kapitulaciis, kaj forsendis ilin liberigitaj, kaj paciĝis kun la popoloj de Harado; kaj la sklavojn de Mordoro li liberigis kaj donis al ili

ĉiujn terojn ĉirkaŭ lago Nurneno por ilia propra uzado. Kaj multaj estis kondukitaj al li por ricevi liajn laŭdojn kaj kompensaĵon pro la kuraĝeco; kaj laste la estro de la gardistoj kondukis al li por prijuĝo Beregondon. Kaj la reĝo diris al Beregondo:

— Beregondo, per via glavo estis verŝita sango en la Sanktejo, kie tio estas malpermesita. Krome, vi forlasis vian postenon sen permeso de la Reganto aŭ de via komandanto. Pro tiuj aferoj en pratempo la puno estis morto. Nun mi devas anonci vian sorton.

» Ĉiu puno estas nuligita pro via kuraĝo en batalo, kaj eĉ pli pro tio, ke ĉio farita de vi rezultis pro amo al la mastro Faramiro. Malgraŭ tio, vi devas forlasi la gardistaron de la Citadelo, kaj vi devos foriri el la Urbo Minaso Tirit.

La sango forlasis la vizaĝon de Beregondo, kaj li estis dolorigita en la koro kaj klinis sian kapon. Sed la Reĝo diris:

— Tiel devas okazi, ĉar vi estas postenigota en la Blanka Trapo, la gardistaro de Faramiro, Princo de Itilio, kaj vi estos la trupestro kaj loĝos en Emino Arnen honore kaj pace, servante tiun, por kiu vi riskis ĉion, por savi lin el la morto.

Kaj tiam Beregondo, perceptante la indulgon kaj justecon de la Reĝo, iĝis ĝoja, kaj genuinte kisis lian manon kaj foriris feliĉa kaj kontenta. Kaj Aragorno donis al Faramiro Itilion kiel ties princlandon, kaj ordonis ke li loĝadu en la montaro Emino Arnen en la vidkampo de la Urbo.

— Ĉar, — li diris, — Minaso Itil en la Morgula Valo estos komplete detruita kaj, kvankam ĝi eble kun paso de la tempo estos purigita, neniu povos loĝi tie dum multaj longaj jaroj.

Kaj lastan el ĉiuj Aragorno salutis Eomeron de Rohano, kaj ili brakumis sin, kaj Aragorno diris:

— Inter ni ne povas esti parolo pri donado aŭ ricevado, nek pri kompensaĵo; ĉar ni estas fratoj. En horo feliĉa Eorlo rajdis el la Nordo, kaj neniam estis ligateco de popoloj pli benita, tiel ke neniu iam ajn malplenumis la dezirojn de l' alia, nek tion iam faros. Nu, kiel vi scias, ni kuŝigis Teodenon la Faman en tombo en la Sanktejo, kaj tie li kuŝos por ĉiam inter la Reĝoj de Gondoro, se vi volas. Aŭ se vi deziros tion, ni venos al Rohano kaj reportos lin por ripozi inter lia propra popolo.

Kaj Eomero respondis:

— Ekde tiu tago, kiam vi leviĝis antaŭ mi el la verda herbaro de la montetoj, mi vin amas, kaj tiu amo ne velkos. Sed nun mi devos foriri por kelka tempo al mia propra regno, kie multo estas kuracenda kaj ordigenda. Sed koncerne la Falinton, kiam ĉio estos pretigita, ni revenos por li; sed intertempe li dormu ĉi tie. Kaj Eovina diris al Faramiro:

— Nun mi devas reiri al mia propra lando kaj rigardi ĝin ankoraŭ unufoje, kaj helpi mian fraton en lia laboro; sed kiam tiu, kiun mi longe amis kiel patron, estos entombigita, mi revenos.

Tiel pasis la ĝojaj tagoj; kaj la okan tagon de majo la rajdistoj de Rohano pretigis sin kaj forrajdis laŭ la Norda Vojo, apud kiu staris homoj honorantaj kaj laŭdantaj ilin, de la Pordego de la Urbo ĝis la muroj de Pelenoro. Kaj ĉiuj aliaj, kiuj loĝadis malproksime, reiris jubile al siaj hejmoj; sed en la Urbo estis laboro de multaj manoj entuziasmaj por rekonstrui kaj renovigi, kaj forigi ĉiujn militcikatrojn kaj la memoron pri la mallumo.

La hobitoj plu restadis en Minaso Tirit kun Legolaso kaj Gimlio, ĉar Aragorno ne volis, ke la kunularo malligiĝu.

— Fine ĉio simila devos ĉesi, — li diris, — sed mi preferus, ke vi restu iomete pli longe: ĉar la kompletiĝo de ĉiuj faroj partoprenitaj de vi ankoraŭ ne okazis. Proksimiĝas tago, kiun mi antaŭvidis dum ĉiuj jaroj de mia vireco, kaj kiam tiu venos, mi deziras ke miaj amikoj estu kun mi.

Sed pri tiu tago li rifuzis diri ion plian.

Dum tiuj tagoj la Kunularanoj de la Ringo loĝis kune en bela domo kun Gandalfo, kaj ili iris laŭvole ien-tien. Kaj Frodo diris al Gandalfo:

— Ĉu vi scias, kia estos tiu tago, pri kiu parolas Aragorno? Ĉar ni estas feliĉaj ĉi tie, kaj ne sopiras foriri; sed la tagoj forkuras, kaj Bilbo atendas; kaj la Provinco estas mia hejmo.

— Ankaŭ Bilbo, — diris Gandalfo, — atendas tiun saman tagon, kaj li scias, kio prokrastigas vin. Kaj koncerne la pasadon de la tagoj, nun estas nur majo, kaj ankoraŭ ne komenciĝis la somero; kaj kvankam ĉio ŝajnas ŝanĝita, kvazaŭ forpasus monda epoko, tamen laŭ la arboj kaj la herbo pasis malpli ol jaro post kiam vi ekvojaĝis.

— Grinĉjo, — diris Frodo, — ĉu vi ne diris, ke Gandalfo estas malpli sekretema ol antaŭe? Li tiam laciĝis pro siaj laboroj, ŝajnas al mi. Nun li refortiĝas.

Kaj Gandalfo diris:

— Multaj ŝatas scii anticipe, kio estas metota sur la tablon; sed tiuj, kiuj laboris pretigante la feston ŝatas teni sian sekreton, ĉar miro plilaŭtigas la laŭdvortojn. Kaj Aragorno mem atendas signon.

Venis tago, en kiu Gandalfo ne estis trovebla, kaj la kunuloj scivolis, kio estas okazonta. Sed Gandalfo kondukis Aragornon el la Urbo nokte al la suda subo de la monto Mindoluino; kaj tie ili trovis padon faritan praepoke, sur kiu malmultaj nun aŭdacis paŝi. Ĉar ĝi kondukis supren sur la monton al alta sanktejo, kien kutimis iri nur la reĝoj. Kaj ili supreniris laŭ kruta vojo, ĝis ili venis al alta kampo sub la neĝoj, kiuj vestis la imponajn

montopintojn, kaj ĝi rigardis trans la krutegaĵon, kiu staris malantaŭ la Urbo. Kaj starante tie ili esploris la terenojn, ĉar venis la mateno; kaj ili vidis la turojn de la Urbo forsube kiel blankajn krajonojn tuŝitajn de la sunlumo, kaj la tuta valo de Anduino similis ĝardenon, kaj la Ombrajn Montojn vualis ora nebuleto. Unuflanke ilia vidkampo etendiĝis ĝis la griza Emin Muilo, kaj la ekbrilo de Raŭroso similis stelon flagrantan en malproksimo. Kaj aliflanke ili vidis la Riveron kiel rubandon kuŝigitan ĝis Pelargiro, kaj poste estis lumo sur la orlo de la ĉielo, kiu indikis la maron.

Kaj Gandalfo diris:

— Jen via regno kaj la kerno de pli granda regno estonta. La Tria Epoko de la mondo finiĝis, kaj la nova epoko komenciĝis; kaj via tasko estas ordigi ĝian komenciĝon kaj konservi tion, kio meritas konserviĝon. Ĉar, kvankam multo estas savita, multo devas nun forpasi; kaj ankaŭ la potenco de la Tri Ringoj finiĝis. Kaj ĉiuj landoj, kiujn vi vidas, kaj tiuj ĉirkaŭantaj ilin, estos loĝataj de Homoj. Ĉar venas la tempo de la Homa Superregado, kaj la Pliaĝa Parencaro velkos aŭ foriros.

— Mi bone scias tion, kara amiko, — diris Aragorno, — sed mi volas plu havi vian konsiladon.

— Jam ne tre longe, — diris Gandalfo. — La Tria Epoko estis mia epoko. Mi estis la Malamiko de Saŭrono; kaj mia laboro ĉesis. Baldaŭ mi foriros. La ŝarĝo devas nun pezi sur vin kaj vian parencaron.

— Sed mi mortos, — diris Aragorno. — Ĉar mi estas mortemulo, kaj kvankam pro tio, kio mi estas, kaj de la raso Okcidenta nemiksita, mi eble havos vivon pli longan ol aliaj, tamen tio estos nur tempeto; kaj kiam tiuj, kiuj estas en la virinaj uteroj, naskiĝos kaj maljuniĝos, ankaŭ mi maljuniĝos. Kaj kiu tiam regos Gondoron kaj tiujn, kiuj fidas tiun ĉi Urbon, kvazaŭ sian reĝinon, se mia deziro ne estos plenumita. La Arbo en la Korto de l' Fontano ankoraŭ estas velkinta kaj malfekunda. Kiam mi vidos signon, ke iam estos alie?

— Forturnu vian vizaĝon de la verda mondo, kaj rigardu tien, kie ĉio ŝajnas malfekunda kaj malvarma!

Tiam Aragorno turnis sin, kaj malantaŭ li estis ŝtonoza deklivo subeniranta de la randoj de la neĝo; kaj rigardante li konsciiĝis, ke tie sola en la dezerta lando staris kreskaĵo. Kaj li supreniris al ĝi kaj ekvidis, ke el la rando de la neĝo leviĝis arbido alta ne pli ol tri futojn. Jam ĝi eligis junajn foliojn longajn kaj belformajn, malhelajn supre kaj arĝentajn sube, kaj sur sia svelta pinto ĝi portis florgrapoleton, kies blankaj petaloj brilis kiel la sunluma neĝo.

Tiam Aragorno kriis:

— *Yé! utúvienyes*! Mi trovis ĝin! Jen! Ĉi tie estas ido de la Plejaĝa el la

Arboj! Sed kiel ĝi kreskas ĉi tie? Ĉar ĝi mem ankoraŭ ne estas sep jarojn aĝa.

Kaj Gandalfo alirinte rigardis ĝin kaj diris:

— Vere ĝi estas arbido el la linio de la bela Nimloto, kaj tiu estis plantido de Galatiliono, kaj tiu estis frukto de Telperiono multnoma, la Plejaĝa el la Arboj. Kiu povas diri, kiel ĝi venas ĉi tien en la difinita horo? Sed tie ĉi estas antikva sanktejo, kaj frukto estis semita ĉi tie nepre antaŭ ol la reĝoj falis kaj la Arbo velkis en la korto. Ĉar oni diras, ke kvankam la frukto de la Arbo malofte maturiĝas, tamen la vivo en ĝi povas poste kuŝi dormanta tra multaj longaj jaroj, kaj neniu povas antaŭdiri la tempon, kiam ĝi vekiĝos. Memoru tion. Ĉar se iam frukto maturiĝos, ĝi devos esti plantita, por eviti, ke la linio formortu el la mondo, same kiel la raso de Elendilo kuŝis kaŝite en la dezertoj de la nordo. Tamen la linio de Nimloto estas multe pli aĝa ol via linio, Reĝo Elesaro.

Poste Aragorno metis sian manon milde al la arbido, kaj jen! Ĝi ŝajnis kroĉiĝi nur malforte al la tero, kaj ĝi estis elterigita sendamaĝe; kaj Aragorno reportis ĝin al la Citadelo. Poste la velkinta arbo estis elradikigita, sed kun respektego; kaj oni ne bruligis ĝin, sed kuŝigis ĝin en la silento de Rat Dineno. Kaj Aragorno plantis la novan arbon en la korto apud la fontano, kaj rapide kaj ĝoje ĝi komencis kreski; kaj kiam alvenis junio, ĝi estis ŝarĝita je arbofloroj.

— La signo estas donita, kaj la tago ne malproksimas, — diris Aragorno kaj starigis sentinelojn sur la muroj.

Estis la tago antaŭ la Somermezo, kiam kurieroj venis el Amono Din al la Urbo kaj diris, ke rajdas el la nordo hela popolo, kiu nun proksimiĝas al la muroj de Pelenoro. Kaj la Reĝo diris:

— Finfine ili venas. La tuta Urbo estu pretigata!

En la antaŭvespero de la Somermezo, kiam la ĉielo estis safirkolora kaj blankaj steloj malfermiĝis en la oriento, sed la okcidento ankoraŭ oris, kaj la aero estis friska kaj belodora, la rajdantoj venis laŭ la Norda Vojo al la pordego de Minaso Tirit. La unuaj rajdis Elrohiro kaj Eladano kun arĝenta standardo, poste venis Glorfindelo kaj Erestoro kaj la tuta domanaro de Rivendelo, post ili venis Damo Galadriela kaj Celeborno, la Mastro de Lotlorieno, sur blankaj ĉevaloj kaj kun ili multaj bonuloj de ilia lando grizmantelitaj kun blankaj gemoj en la haroj; kaj la lasta venis Mastro Elrondo, potenca inter elfoj kaj homoj, kun sceptro de Anuminaso, kaj apud li sur griza pordama rajdĉevalo rajdis lia filino Arvena — la vespera stelo de sia popolo.

Kaj Frodo, vidinte ŝin veni briletanta en la vespero kun steloj sur la frunto kaj dolĉa parfumo ĉirkaŭanta, emociiĝis miregante, kaj li diris al

Gandalfo:

— Fine mi komprenas, kial ni atendis! Jen la finalo! Jam ne nur la tago estos amata, sed ankaŭ la nokto estos bela kaj benata kaj ĝia tuta timo forpasos!

Tiam la Reĝo bonvenigis siajn gastojn, kaj ili elseliĝis; kaj Elrondo transdonis la sceptron, kaj metis la manon de sia filino en la manon de la Reĝo, kaj kune ili supreniris en la Altan Urbon, kaj ĉiuj steloj ekfloris sur la ĉielo. Kaj Aragorno, Reĝo Elesaro, edziĝis kun Arvena Undomiela en la Urbo de la Reĝo en la tago de la Somermezo, kaj la rakonto pri ilia longa atendado kaj penado atingis plenumiĝon.

6

Multaj disiĝoj

Kiam la tagoj de jubilado fine ĉesis, la kunuloj pripensis reiron al la propraj hejmoj. Kaj Frodo iris al la Reĝo, dum tiu sidis kun la Reĝino Arvena apud la fontano, kaj ŝi kantis kanton de Valinoro, dum la Arbo kreskis kaj floris. Ili bonvenigis Frodon kaj stariĝis salute; kaj Aragorno diris:

— Mi scias, kion vi venis diri, Frodo: vi volas reiri al via propra hejmo. Nu, plej kara amiko, arbo plej bone kreskas en la lando de siaj prapatroj; sed vi en ĉiuj landoj de la Okcidento ĉiam estos bonvena. Kaj kvankam via popolo havis malmulte da famo en la legendoj de la grandiozuloj, ĝi jam havos pli da renomo ol multaj vastaj regnoj ne plu ekzistantaj.

— Vere estas, ke mi deziras reiri al la Provinco, — diris Frodo. — Sed unue mi devos iri al Rivendelo. Ĉar se io povus manki en tempo tiel benita, mankis al mi Bilbo; kaj mi malĝojis, kiam mi vidis, ke el la domanaro de Elrondo ne venis li.

— Ĉu tio mirigis vin, Ringoportinto? — diris Arvena. — Vi ja konas la potencon de tiu aĵo, kiu estas nun detruita; kaj ĉio farita de tiu potenco jam forpasas. Sed via parenco posedis ĝin pli longe ol vi. Li aĝe nun maljunas, laŭ sia speco; kaj li atendas vin, ĉar li ne plu faros longajn vojaĝojn, krom unu.

— Do mi petas permeson foriri baldaŭ, — diris Frodo.

— Post sep tagoj ni iros, — diris Aragorno. — Ni rajdos longe kun vi sur la vojo ĝis Rohano. Post tri tagoj Eomero revenos ĉi tien por reporti Teodenon al ripozo en Markio, kaj ni rajdos kun li por honori la falintojn. Sed nun antaŭ ol vi iros, mi konfirmas tiujn vortojn, kiujn diris al vi Faramiro, kaj vi por ĉiam estos liberulo en la regno Gondoro; kaj same ĉiuj viaj kunuloj. Kaj se estus donacoj doneblaj konforme al viaj faroj, vi ricevus ilin; sed kion ajn vi deziras, tion vi kunportos kun vi, kaj vi rajdos honorate kaj vestite kiel princoj de la lando.

Sed Reĝino Arvena diris:

— Donacon mi donos al vi. Mi estas la filino de Elrondo. Mi ne iros kun li, kiam li foriros al la Havenoj; ĉar mia elekto estas tiu de Lutiena, kaj kiel ŝi, tiel ankaŭ mi elektis la dolĉan kaj la amaran. Sed anstataŭ mi foriros vi, Ringoportinto, kiam venos la tempo, kaj se vi deziros tion. Se viaj doloroj ankoraŭ ĉagrenos vin, kaj la memoro pri via ŝarĝo plu pezos, tiuokaze vi

rajtos iri en la Okcidenton, ĝis ĉiuj viaj vundoj kaj lacecoj kuraciĝos. Sed portu nun ĉi tion memore pri Elfŝtono kaj Vesperstelo, kun kiuj via vivo interplektiĝis!

Kaj ŝi prenis blankan gemon stelsimilan, kiu kuŝis sur ŝia brusto pende de arĝenta ĉeno, kaj ŝi metis la ĉenon ĉirkaŭ la kolon de Frodo.

— Kiam memoro pri la timo kaj la mallumo ĉagrenos vin, — ŝi diris, — tio ĉi havigos al vi helpon.

Post tri tagoj, kiel diris la Reĝo, el Rohano venis rajde Eomero, kaj kun li venis *eoredo* el la plej belaj kavaliroj de Markio. Oni bonvenigis lin; kaj kiam ili ĉiuj sidis ĉe tablo en Meretrondo, la Granda Halo de la Festenoj, li vidis la belon de la ĉeestantaj damoj, kaj mirego plenigis lin. Kaj antaŭ ol li iris ripozi, li alvokis la gnomon Gimlio kaj diris al tiu:

— Gimlio, filo de Gloino, ĉu via hakilo pretas?

— Ne, sinjoro, — diris Gimlio, — sed mi povas rapide ekhavi ĝin, se estos necese.

— Vi juĝos, — diris Eomero. — Ĉar ankoraŭ kuŝas inter ni iuj malprudentaj vortoj pri la damo de la Ora Arbaro. Kaj nun mi vidis ŝin propraokule.

— Nu, sinjoro, — diris Gimlio, — kion vi nun diras?

— Ve! — diris Eomero. — Mi ne diros, ke ŝi estas la plej bela damo vivanta.

— Do, mi devos alporti mian hakilon, — diris Gimlio.

— Sed unue mi devas proponi jenan senkulpiĝon, — diris Eomero. — Se mi vidus ŝin en alia societo, mi dirus ĉion, kion vi deziras. Sed mi taksas la unua Reĝinon Arvena Vesperstelo, kaj mi estas preta miaparte batali kontraŭ iu ajn, kiu defias min. Ĉu mi havigu al mi mian glavon?

Tiam Gimlio malalten riverencis.

— Ne, vi estas pardonita miaflanke, sinjoro, — li diris. — Vi elektis la vesperon, sed mia amo estas direktita al la mateno. Kaj mia koro anticipe timas, ke baldaŭ ĝi forpasos por ĉiam.

Fine venis la tago de foriro, kaj granda bela grupo pretigis sin por rajdi norden el la Urbo. Tiam la reĝoj de Gondoro kaj Rohano iris al la Sanktejo kaj ili venis ĝis la tomboj en Rat Dineno, kaj ili forportis Reĝon Teodeno sur ora kadavroportilo, kaj trapasis silente la Urbon. Poste ili metis la portilon sur grandan ĉaron, kiun ĉirkaŭis rajdistoj de Rohano kun sia standardo antaŭe; kaj Gaja, kiel eskviro de Teodeno, veturis sur la ĉaro kaj gardis la armilojn de la Reĝo.

Al la aliaj kunuloj estis havigitaj ĉevaloj konforme al ilia staturo; kaj Frodo kaj Samsaĝo rajdis apud Aragorno, kaj Gandalfo rajdis sur Ombrofakso, kaj Grinĉjo rajdis kun la kavaliroj de Gondoro; kaj Legolaso

kaj Gimlio kiel ĉiam rajdis duope sur Arodo.

En tiu rajdado partoprenis ankaŭ Reĝino Arvena, kaj Celeborno kaj Galadriela kun siaj popolanoj, kaj Elrondo, kaj liaj filoj; kaj la princoj de Dol Amroto kaj de Itilio, kaj multaj trupestroj kaj kavaliroj. Neniam iu ajn reĝo de Markio havis tian akompanon, kia iris kun Teodeno, filo de Tengelo, al lia hejmlando.

Senhaste kaj trankvile ili pasis en Anorienon, kaj ili alvenis la Grizan Arbaron sub Amono Din; kaj tie ili aŭdis sonojn, kvazaŭ de tamburoj batantaj en la montaro, kvankam neniu vivanto estis videbla. Tiam Aragorno sonorigis la trumpetojn; kaj heroldoj kriis:

— Vidu, Reĝo Elesaro estas veninta! La arbaron Druadano li donas al Gan-Buri-Gano kaj al ties popolo, ke ĝi estu por ĉiam ilia posedaĵo; kaj ekde nun neniu eniru ĝin sen ilia permeso!

Poste la tamburoj laŭte tondregis kaj silentiĝis.

Fine post dek kvin tagoj da vojaĝado la ĉaro de Reĝo Teodeno trapasis la verdajn kampojn de Rohano kaj venis al Edoraso; kaj tie ĉiuj ripozis. La Ora Halo estis ornamita per belaj drapaĵoj, kaj ĝi estis lumoplena, kaj tie okazis la plej elstara festo, kiun ĝi konis ekde la tagoj de ĝia konstruado. Ĉar post tri tagoj la rohananoj pretigis la entombigon de Teodeno; kaj li estis kuŝigita en ŝtona domo kune kun siaj armiloj kaj multaj aliaj belaĵoj poseditaj de li, kaj super li estis starigita granda teramaso, kovrita de verda herbo kaj de blankaj miozotoj. Kaj nun estis ok teramasoj sur la orienta flanko de la Tumulkampo.

Poste la rajdistoj de la Reĝa Domo sur blankaj ĉevaloj ĉirkaŭrajdis la tumulon kaj kantis kune kanton pri Teodeno, filo de Tengelo, kiun kreis lia menestrelo Gleovino, kaj li neniam poste kreis kanton. La malrapidaj voĉoj de la rajdistoj emociis la korojn eĉ de tiuj, kiuj ne scipovis la lingvon de tiu popolo; sed la vortoj de la kanto lumigis la okulojn de la rohananoj: aŭdante denove en foro la tondron de la hufoj de la nordo kaj la voĉon de Eorlo, krianta super la batala bruo sur la kampo de Celebranto; kaj la rakonto pri la reĝoj daŭris, kaj la korno de Helmo laŭtis en la montaro, ĝis venis la Mallumo, kaj Reĝo Teodeno leviĝis kaj rajdis tra la Ombro ĝis la fajro, kaj mortis grandioze, ĝuste kiam la suno, reveninte eksterespere, ekbrilis al Mindoluino en la mateno.

El dubo, el mallumo, al tagleviĝo
li rajdis subsune kantante kun glavo nuda.
Esperon li ĉendis ree, en espero finiĝis;
super morton, timon, missorton levita
el perdo, el vivo, al longa glorado.

Sed Gaja staris sube de la verda teramaso, kaj li ploris, kaj kiam ĉesis la kanto, li stariĝis kaj kriis:

— Reĝo Teodeno, Reĝo Teodeno! Adiaŭ! Kvazaŭ patro vi estis al mi dum iom da tempo. Adiaŭ!

Kiam la entombigo finiĝis, kaj la plorado de virinoj ĉesis, kaj Teodeno fine estis lasita sola en sia tumulo, tiam oni venis al la Ora Halo por la granda festeno kaj flankenmetis malĝojon, ĉar Teodeno vivis ĝis maljuniĝo kaj mortis ne malpli glore ol liaj prapatroj. Kaj kiam la tempo venis, kiam laŭmore ili estis trinkontaj je memoro de la reĝoj, Eovina, Damo de Rohano, elpaŝis, ora kiel la suno kaj blanka kiel la neĝo, kaj ŝi portis plenan pokalon al Eomero.

Tiam stariĝis menestrelo-analisto kaj nomis ĉiujn nomojn de la Mastroj de Markio laŭvice: Eorlo la Juna; kaj Brego konstruinto de la Halo; kaj Aldoro frato de la malfeliĉa Baldoro; kaj Freo, kaj Freovino, kaj Orvino, kaj Deoro, kaj Gremo; kaj Helmo, kiu kuŝis en Profundaĵo de Helmo kiam Markio estis okupita; kaj tiel finiĝis la naŭ tumuloj de la okcidenta flanko, ĉar tiutempe la linio estis rompita, kaj poste venis la tumuloj de la orienta flanko: Frealafo, filo de la fratino de Helmo, kaj Leofo, kaj Valdo, kaj Folko, kaj Folkvino, kaj Fengelo, kaj Tengelo, kaj Teodeno la plej lasta. Kaj kiam Teodeno estis nomita, Eomero eltrinkis la pokalon. Poste Eovina ordonis, ke la servantoj replenigu la tasojn, kaj ĉiuj ĉeestantoj stariĝis kaj tostis la novan reĝon, kriante:

— Saluton, Eomero, Reĝo de Markio!

Finfine, kiam la festo proksimiĝis al sia fino, Eomero stariĝis kaj diris:

— Nu, tiu ĉi estas la entombiga festo de Reĝo Teodeno; sed mi parolos antaŭ ol ni foriros pri ĝojaj novaĵoj, ĉar li ne domaĝus, ke mi tion faru, ĉar li ĉiam estis patro por Eovina, mia fratino. Do aŭdu ĉiuj gastoj, belaj popoloj el multaj regnoj, neniam antaŭe tiome kuniĝintaj en tiu ĉi halo! Faramiro, Reganto de Gondoro kaj Princo de Itilio, petas, ke Eovina, Damo de Rohano, estu lia edzino, kaj ŝi tion konsentas plenvolonte. Tial ili estos gefianĉigitaj antaŭ vi ĉiuj.

Kaj Faramiro kaj Eovina elpaŝis kaj metis manon en manon; kaj ĉiuj ĉeestantoj tostis ilin kaj ĝojis.

— Tiel, — diris Eomero, — la amikeco inter Markio kaj Gondoro estas ligita per nova ligilo, kaj tiom pli mi ĝojegas.

— Nenia avarulo estas vi, Eomero, — diris Aragorno, — tiel donacante al Gondoro la plej belan valoraĵon de via regno!

Tiam Eovina rigardis en la okulojn de Aragorno, kaj ŝi diris:

— Deziru por mi ĝojon, mia feŭdmastro kaj kuracinto! Kaj li respondis:

— Mi deziris por vi ĝojon depost kiam mi la unuan fojon vidis vin.

Kuracas mian koron jam vidi vin feliĉa.

Kiam finiĝis la festo, la forirontoj adiaŭis Reĝon Eomero. Aragorno kun siaj kavaliroj kaj la popolanoj de Lorieno kaj Rivendelo, pretigis sin por forrajdi; sed Faramiro kaj Imrahilo restis en Edoraso; kaj ankaŭ Arvena Vesperstelo restis, kaj ŝi adiaŭis siajn fratojn. Neniu vidis ŝian lastan renkontiĝon kun ŝia patro Elrondo, ĉar ili supreniris en la montaron kaj tie longe interparolis, kaj malĝoja estis ilia disiĝo, kiu daŭros ĝis la fino de la mondo.

Laste antaŭ ol la gastoj ekvojaĝis, Eomero kaj Eovina venis al Gaja, kaj ili diris:

— Adiaŭ jam, Gajadoko de la Provinco kaj Holdvino de Markio! Rajdu al bona fortuno, kaj rajdu baldaŭ retro al nia bonvenigo!

Kaj Eomero diris:

— En la pratempo reĝoj ŝarĝintus vin per donacoj, kiujn ĉaro ne eltenus, pro viaj faroj sur la kampoj de Mundburgo; kaj tamen vi akceptos nenion, vi diras, krom la armiloj donitaj al vi. Tion mi permesas, ĉar efektive mi ne posedas donacon, kiu indas; sed mia fratino petegas, ke vi ricevu tiun etaĵon, kiel memoron pri Dernkasko kaj la kornoj de Markio je mateniĝo.

Tiam Eovina donacis al Gaja antikvan kornon, etan sed rare faritan el bela arĝento kun verda balteo; kaj metiistoj gravuris sur ĝi rapidajn rajdantojn en spaliro, kiu ĉirkaŭvolvis ĝin de la kloŝo ĝis la buŝpeco; kaj tie estis metitaj grandsignifaj runaĵoj.

— Tio estas heredaĵo de nia domlinio, — diris Eovina. — Ĝin faris la gnomoj, kaj ĝi devenis el la provizo de la drako Skato. Eorlo la Juna alportis ĝin el la nordo. Kiu blovas ĝin pro neceso, tiu timigos la korojn de siaj malamikoj kaj ĝojigos la korojn de siaj amikoj, kaj tiuj aŭdos lin kaj venos al li.

Do Gaja akceptis la kornon, ĉar ĝi estis nerifuzebla, kaj li kisis la manon de Eovina; kaj ili brakumis lin, kaj tiel ili disiĝis tiutempe.

Nun la gastoj estis pretaj, kaj ili eltrinkis la forirtason, kaj kun grandaj laŭdoj kaj amikeco ili disiĝis kaj venis finfine al la Profundaĵo de Helmo, kaj tie ili restis du tagojn. Tiam Legolaso plenumis sian promeson al Gimlio kaj akompanis lin al la Ekbrilaj Kavernoj; kaj reveninte li silentis, kaj volis diri nur, ke Gimlio sola povus trovi vortojn taŭgajn por priparoli ilin:

— Neniam antaŭe gnomo povis venki elfon en vortkonkurso, — li diris. — Nun do ni iru al Fangorno kaj ĝustigu la kalkulon!

El Profunda Kavaĵo ili rajdis al Isengardo, kaj vidis pri kio okupas sin entoj. La tuta ŝtoncirklo estis deĵetita kaj forigita, kaj la grundo interne estis ĝardenigita, plena je hortoj kaj arboj, kaj tra ĝi fluis rojo; sed meze de ĉio estis lago el klara akvo, kaj el ĝi leviĝis ankoraŭ la Turego de Ortanko, alta

kaj nevenkebla, kaj ĝia nigra roko estis spegulata en la lageto.

Dum kelka tempo la vojaĝantoj sidis, kie iam staris la malnova pordego de Isengardo, kaj tie nun estis du arboj altaj kiel sentineloj ĉe la komenciĝo de verdranda pado kondukanta al Ortanko; kaj ili rigardis mire la faritan laboron, sed nenion vivantan ili povis vidi, ĉu fore, ĉu proksime. Sed baldaŭ ili aŭdis voĉon: "hum-hom, hum-hom"; kaj venis Arbobarbo paŝeganta laŭlonge de la pado por saluti ilin kun Rapidtrunko apude.

— Bonvenon al la Arbejo de Ortanko! — li diris. — Mi sciis, ke vi venas, sed mi laboris en la fora valo; multo estas ankoraŭ farenda. Sed ankaŭ vi ne maldiligentis fore en la sudo kaj oriento, mi aŭdas; kaj ĉio, kion mi aŭdas, estas bona, tre bona.

Poste Arbobarbo laŭdis ĉiujn iliajn farojn, pri kiuj li ŝajnis plene informita; kaj finfine li ĉesis kaj longe rigardis Gandalfon.

— Nu, vidu! — li diris. — Vi pruviĝis la plej potenca, kaj prosperis ĉiuj viaj penoj. Kien vi nun volas iri? Kaj kial vi venis ĉi tien?

— Por vidi, kiel progresas via laboro, amiko mia, — diris Gandalfo, — kaj por danki vin pro via helpo en ĉio, kio estas plenumita.

— *Hum*, nu tio estas sufiĉe justa, — diris Arbobarbo, — ĉar efektive entoj ludis rolon. Kaj ne nur traktante tiun, *hum*, tiun malbenitan arbomortiginton, kiu loĝis ĉi tie. Ĉar okazis granda inundo far tiuj, *burarum*, tiuj malicokulaj-nigramanaj-kurbakruraj-salikokoraj-krifofingraj-fetorventraj-sangsoifaj, *morimaite-sincahonda, hum*, nu, vi estas raso rapidema, kaj ilia plena nomo estas tiel longa kiel jaroj da turmento, tiuj orkaj fibestoj; kaj ili venis trans la riveron kaj suden el la nordo kaj ĉie ĉirkaŭ la arbaro Laŭrelindorinano, kiun ili ne povis penetri, dank' al la potenculoj, kiuj troviĝas tie. — Li riverencis al la gemastroj de Lorieno. — Kaj tiuj samaj fikreaĵoj estis pli ol surprizitaj renkontante nin ekstere sur la montetaro, ĉar ili ne aŭdis pli frue pri ni; kvankam tion oni povas diri ankaŭ pri popoloj pli valoraj. Kaj ne multaj memoros nin, ĉar ne multaj vivante eskapis nin, kaj la rivero ricevis la plejmulton el tiuj. Sed tio profitis al vi, ĉar se ili ne renkontus nin, tiuokaze la reĝo de la herblando ne rajdus malproksimen, kaj se li tamen jes, ne ekzistus hejmo, al kiu li revenus.

— Mi bone scias tion, — diris Aragorno, — kaj neniam tio estos forgesita en Minaso Tirit kaj en Edoraso.

— *Neniam* estas vorto tro longa eĉ por mi, — diris Arbobarbo. — Ne dum la daŭro de viaj reĝlandoj, vi intencas diri; sed tiuj devos daŭri vere tre longe por ŝajni longaj al entoj.

— La Nova Epoko komenciĝas, — diris Gandalfo, — kaj en tiu ĉi epoko eble pruviĝos, ke la regnoj de la homoj pretervivos vin, mia amiko Fangorno. Sed jam diru al mi: kio pri la tasko, kiun mi Starigis al vi? Kiel

fartas Sarumano? Ĉu li ankoraŭ ne tediĝis pri Ortanko? Ĉar mi ne supozas, ke li taksos plibonigita la elrigardon tra siaj fenestroj.

Arbobarbo longe rigardis Gandalfon, rigardis preskaŭ ruze, pensis Gaja.

— Ha! — li diris. — Mi supozis, ke ĝis tie vi venos. Ĉu li tediĝis pri Ortanko? Tre tediĝis fine, sed ne tiom tediĝis pri sia turego, kiom pri mia voĉo. *Hum*! Mi havigis al li kelkajn longajn rakontojn, aŭ almenaŭ kiujn oni taksus longaj en via lingvo.

— Kial do li restis por aŭskulti? Ĉu vi iris en Ortankon? — demandis Gandalfo.

— *Hum*, ne, ne en Ortankon! — diris Arbobarbo. — Sed li venis al sia fenestro kaj aŭskultis, ĉar novaĵojn li ne povis akiri alimaniere, kaj kvankam li malŝategis la novaĵojn, li avidis ilin; kaj mi certigis, ke li aŭdu ĉion. Sed mi aldonis tre multajn aferojn al la novaĵoj, kiujn estis bone por li aŭskulti. Li fariĝis treege tedita. Li ĉiam estis hastema. Tio minigis lin.

— Mi rimarkas, mia bona Fangorno, — diris Gandalfo, — ke tre atente vi diras *is, is, is*. Kio pri *as*? Ĉu li estas mortinta?

— Ne, ne mortinta, laŭ mia scio, — diris Arbobarbo. — Sed li foriris. Jes, li foriris. Mi permesis, ke li iru. Malmulto restis en li, kiam li elrampis, kaj lia vermulo similis palan ombron. Nu, ne diru al mi, Gandalfo, ke mi promesis reteni lin sekure, ĉar mi scias tion. Sed la aferoj ŝanĝiĝis post tiam. Kaj mi retenis lin ĝis li estis sekura, sekura je plia misfarado. Vi devus scii, ke antaŭ ĉio mi malŝatas enkarcerigon de vivantaĵoj, kaj mi ne konsentas reteni enkaĝe eĉ tiajn kreaĵojn, kiaj tiuj, pli longe ol devigas la neceso. Sendenta serpento rajtas rampi, kie ĝi volas.

— Vi eble pravas, — diris Gandalfo; — sed tiu serpento ankoraŭ posedas unu denton, al mi ŝajnas. Li havis la venenon de sia voĉo, kaj mi konjektas, ke li persvadis vin, eĉ vin, Arbobarbon, konante la molan lokon en via koro. Nu, li foriris, kaj nenio pli dirindas. Sed la Turego de Ortanko nun reiras al la Reĝo, al kiu ĝi apartenas. Kvankam eble li ne bezonos ĝin.

— Tio vidiĝos poste, — diris Aragorno. — Sed mi donos al la entoj tiun ĉi tutan valon por trakti tiel, kiel ili volas, kondiĉe ke ili vaĉu Ortankon kaj certigu, ke neniu eniru ĝin sen mia permeso.

— Ĝi estas ŝlosita, — diris Arbobarbo. — Mi devigis Sammanon ŝlosi ĝin kaj doni al mi la ŝlosilojn. Rapidtrunko havas ilin.

Rapidtrunko riverencis kvazaŭ arbo kliniĝanta en la vento kaj transdonis al Aragorno nigrajn ŝlosilegojn komplike formitajn, kunigitaj per ŝtala ringo.

— Mi dankas vin ankoraŭfoje, — diris Aragorno, — kaj mi adiaŭas vin. Ke via arbaro kresku pace. Kiam ĉi tiu valo estos plenigita, troviĝos pli ol sufiĉa loko okcidente de la montoj, kie iam antaŭ longe vi promenis.

La vizaĝo de Arbobarbo malĝojiĝis.

— Arbaroj eble kreskos, — li diris. — Arboj eble disvastiĝos. Sed ne entoj. Mankas entidoj.

— Tamen eble jam estas pli da espero en via serĉado, — diris Aragorno. — Oriente al vi estos malfermitaj landoj, kiuj estis longe fermitaj.

Sed Arbobarbo skuis la kapon kaj diris:

— Tio estas tre malproksima. Kaj tie troviĝas nun tro multaj homoj. Sed mi forgesas mian bonkonduton! ĉu vi ne volos resti ĉi tie kaj iom ripozi? Kaj eble ĉeestas iuj, kiuj ŝatus trapasi la arbaron Fangorno por mallongigi la vojon al siaj hejmoj? — Li rigardis al Celeborno kaj Galadriela.

Sed ĉiuj krom Legolaso diris, ke ili devos nun adiaŭi kaj foriri suden aŭ okcidenten.

— Venu, Gimlio! — diris Legolaso. — Nun laŭ permeso de Fangorno mi vizitos la profundejojn de la Entarbaro kaj vidos tiajn arbojn, kiaj ne estas troveblaj aliloke en Mez-Tero. Vi akompanos min kaj plenumos vian promeson; kaj tiel ni plu vojaĝos kune en Mornarbaron kaj pluen.

Gimlio konsentis pri tio, kvankam ŝajne ne tre entuziasme.

— Jen do finfine okazas la finiĝo de la Kunularo de la Ringo, — diris Aragorno. — Tamen mi esperas, ke post nelonge vi revenos al mia lando kun la helpo promesita.

— Ni venos, se permesos niaj propraj mastroj, — diris Gimlio. — Nu, adiaŭ, miaj hobitoj! Vi devos jam atingi sendanĝere la proprajn hejmojn, kaj min ne tenos maldorma timo pri via endanĝeriĝo. Mi sendos informojn, kiam mi povos, kaj kelkaj el ni eble renkontiĝos de tempo al tempo; sed mi timas, ke neniam plu ni ĉiuj kuniĝos samloke.

Poste Arbobarbo adiaŭis ilin laŭvice, kaj li riverencis trifoje malrapide kaj kun respektego al Celeborno kaj Galadriela kaj diris:

— Pasis longa, longa tempo de kiam ni renkontiĝis ĉe stumpo aŭ ŝtono, *A vanimar vanimálion nostari*! Estas malĝoje, ke ni renkontiĝis nur tiel ĉe la fino. Ĉar la mondo ŝanĝiĝas; tion mi sentas en la akvo, mi sentas en la tero, kaj mi flaras tion en la aero. Al mi ŝajnas, ke ni neniam plu renkontos unu alian.

Kaj Celeborno diris:

— Mi ne scias, Plejaĝa.

Sed Galadriela diris:

— Ne en Mez-Tero, nek ĝis la landoj submaraj denove estos levitaj. Tiam en la salikejoj de Tasarinano ni eble renkontiĝos printempe. Adiaŭ!

Plejlaste Gaja kaj Grinĉjo adiaŭis la maljunan enton, kaj tiu pligajiĝis rigardante ilin:

— Nu, miaj ĝojuloj, ĉu vi trinkos kun mi plian gluton antaŭ ol foriri?

— Volontege, — ili respondis, kaj li kondukis ilin flanken en la ombron de unu el la arboj, kaj tie ili vidis, ke granda ŝtona vazo estas metita. Kaj Arbobarbo plenigis tri bovlojn, kaj ili trinkis; kaj ili vidis liajn strangajn okulojn rigardantaj ilin trans la rando de lia bovlo.

— Gardu vin, gardu vin! — li diris. — Ĉar vi jam kreskis, post kiam mi lastfoje vidis vin.

Ili ridis kaj eltrinkis siajn bovlojn.

— Nu, adiaŭ! — li diris. — Kaj ne forgesu sendi al mi sciigon, se vi aŭdos en via lando novaĵojn pri entedzinoj. — Li flirtigis siajn manegojn al la tuta societo kaj foriris inter la arbojn.

La vojaĝantoj nun rajdis pli rapide, kaj ili vojis al la Breĉo de Rohano; kaj Aragorno adiaŭis ilin finfine proksime al tiu loko, kie Grinĉjo enrigardis la Ŝtonon de Ortanko. La hobitoj malĝojis pro tiu ĉi disiĝo; ĉar Aragorno neniam perfidis ilin, kaj li estis ilia gvidinto tra multaj danĝeroj.

— Mi ŝatus havi ŝtonon, en kiu ni povus vidi ĉiujn niajn amikojn, — diris Grinĉjo, — kaj ke ni povu alparoli ilin de malproksime!

— Jam restas nur unu, kiun vi povus utiligi, — respondis Aragorno, — ĉar vi ne volus vidi, kion montrus al vi la Ŝtono de Minaso Tirit. Sed la *palantiron* de Ortanko la Reĝo retenos por vidi, kio okazas en lia regno, kaj kion faras liaj servistoj. Ĉar ne forgesu, Peregrino Tjuko, ke vi estas kavaliro de Gondoro, kaj mi ne liberigas vin el via servado. Nun vi iros forpermese, sed mi eble revokos vin. Kaj memoru, karaj amikoj el la Provinco, ke mia regno troviĝas ankaŭ en la nordo, kaj iun tagon mi venos tien.

Poste Aragorno adiaŭis Celebornon kaj Galadrielan, kaj la Damo diris al li:

— Elfŝtono, tra mallumo vi venis al via espero, kaj jam vi posedas vian tutan deziron. Uzu bone la tagojn!

Sed Celeborno diris:

— Adiaŭ, parenco! Via sorto estu alia ol la mia, kaj via trezoro restu kun vi ĝis la fino!

Tion dirinte, ili disiĝis, kaj tiam estis la horo de sunsubiro; kaj kiam post kelka tempo ili turnis sin kaj retrorigardis, ili vidis la Reĝon de la Okcidento sidanta sur sia ĉevalo, ĉirkaŭita de siaj kavaliroj; kaj la falanta suno brilis sur ilin kaj briligis ilian armaĵon ruĝore, kaj la blanka mantelo de Aragorno estis iĝinta flamo. Tiam Aragorno prenis la verdan ŝtonon kaj tenis ĝin alte, kaj de la mano venis verda fajro.

Baldaŭ la malmultiĝinta grupo venis al Iseno, transiris ĝin, kaj venis al la transrivera dezertejo, kaj tiam ili turniĝis norden kaj transpasis la limojn de Dunlando. Kaj la dunlandanoj fuĝis kaj kaŝis sin, ĉar ili timis la elfan

popolon, kvankam efektive tre malmultaj iam venis ilian landon. Sed la vojaĝantoj malatentis ilin, ĉar ili estis ankoraŭ granda grupo kaj estis bone provizitaj je ĉio bezonata; kaj ili pluiris malurĝe, starigante siajn tendojn, kiam tio eblis; kaj dum ili iris, la somero forpasadis.

Post kiam ili preterpasis Dunlandon kaj venis al lokoj, kie loĝis malmultaj personoj, kaj eĉ birdoj kaj bestoj malofte vidiĝis, ili vojaĝis tra arbaro descendanta el la Nebulecaj Montoj, kiuj nun etendiĝis je ilia dekstro. Veninte denove en nefermitan terenon ili atingis maljunulon, kiu apogis sin per bastono, kaj li estis vestita en ĉifonoj grizaj aŭ malpure blankaj, kaj post liaj kalkanoj iris alia almozulo malrekta kaj plendanta.

— Nu, Sarumano! — diris Gandalfo. — Kien vi iras?

— Kiel tio koncernas vin? — li respondis. — Ĉu vi ankoraŭ volas aranĝi miajn aferojn, kaj ĉu vi ne estas kontenta pri mia ruiniĝo?

— Vi scias la respondojn: ne kaj ne, — diris Gandalfo. — Sed ĉiuokaze la tempo de miaj laboroj jam proksimiĝas al la fino. La Reĝo surprenis la ŝarĝon. Se vi atendus en Ortanko, vi vidus lin, kaj li traktus vin saĝe kaj indulge.

— Do tiom pli da motivo estas por foriri pli frue, — diris Sarumano, — ĉar de li mi deziras nek unu, nek l' alian. Fakte, se vi deziras respondon al via unua demando, mi serĉas vojon el lia reĝlando.

— Do vi denove iras malĝustan vojon, — diris Gandalfo, — kaj en via vojaĝo mi vidas neniun esperon. Sed ĉu vi rifuzas nian helpon? Ĉar tion ni proponas al vi.

— Ĉu al mi? — diris Sarumano. — Ne, volu ne rideti al mi! Mi preferas viajn brovumojn. Kaj koncerne la jenan Damon, mi ne fidas ŝin: ŝi ĉiam malamis min kaj planis viaparte. Mi ne dubas, ke ŝi kondukis vin laŭ tiu ĉi vojo por havi la plezuron jubili pro mia malriĉeco. Se mi estus avertita pri via persekuto, mi rifuzus al vi tiun plezuron.

— Sarumano, — diris Galadriela, — ni havas aliajn komisiojn kaj zorgojn, kiuj ŝajnas al ni pli urĝaj ol persekuto de vi. Diru prefere, ke vi estas atingita de bona fortuno, ĉar nun vi havas la lastan eblecon.

— Se vere ĝi estas la lasta, mi ĝojas, — diris Sarumano, — ĉar ne ĝenos min la peno denove rifuzi ĝin. Ĉiuj miaj esperoj estas ruinigitaj, sed la viajn mi ne volas partopreni. Se tiajn vi havas. — Liaj okuloj por momento ekardis. — Iru. Ne por nenio mi longe studadis tiujn aferojn. Vi kondamnis vin mem, kaj tion vi scias. Kaj havigos al mi iom da konsolo dum la vagado la penso, ke vi faligis vian propran domon, kiam vi detruis la mian. Kaj nun, kiu ŝipo vin reportos trans la vastan maron? — li mokis. — Ĝi estos ŝipo griza kaj fantomplena. — Li ridis, sed lia voĉo estis krakanta kaj hida.

— Stariĝu, idioto! — li kriis al la alia almozulo, kiu sidiĝis sur la teron;

kaj li batis tiun per sia bastono. — Turnu vin! Se ĉi gloraj personoj iras sur nia vojo, ni iros alian. Stariĝu, aŭ mi donos al vi neniun pankruston por via vespermanĝo!

La almozulo turnis sin kaj pretermalrektis plorvoĉante:

— Kompatinda Grimĉjo! Kompatinda Grimĉjo! Ĉiam batata kaj malbenata. Kiom mi malamas lin! Mi ŝatus forlasi lin!

— Do forlasu lin! — diris Gandalfo.

Sed Vermlango nur direktis rigardon per la ŝmiritaj okuloj timoplenaj al Gandalfo, kaj poste pretertreniĝis malantaŭ Sarumano. Pasante la trupon, la mizera paro alvenis la hobitojn, kaj Sarumano haltis kaj gapis al ili, sed ili rigardis lin kompate.

— Do ankaŭ vi venis jubili, miaj bubetoj, ĉu? — li diris. — Al vi estas indiferentaj la mankaĵoj de almozulo, ĉu ne? Ĉar vi havas ĉion deziratan, manĝaĵon kaj belajn vestaĵojn, kaj la plej bonan pipherbon por viaj pipoj. Ho jes, mi scias! Mi scias, de kie ĝi venas. Vi ne donos pipoplenon al almozulo, ĉu?

— Mi donus, se mi havus, — diris Frodo.

— Vi povas ricevi tion, kio restas al mi, — diris Gaja, — se vi atendos momenton. — Li deĉevaliĝis kaj serĉis en la sako ĉe la selo. Poste li enmanigis al Sarumano ledan saketon. — Prenu tiom, kiom estas. Via akcepto estas bonvena, ĝi devenas de la ruboj en Isengardo.

— La mia, la mia, jes, kaj altpreze aĉetita! — kriis Sarumano, kroĉante la saketon. — Tio ĉi estas nur nominala repago; ĉar vi prenis pli, mi ĵuras. Nu, almozulo devas esti danka, se ŝtelinto redonas al li eĉ ereton de lia propraĵo. Nu, estos juste, kiam vi venos hejmen kaj trovos la aferojn en Sud-kvarono malpli agrablaj ol vi preferus. Longe en via lando estu manko de fumaĵo!

— Dankon! — diris Gaja. — Tiuokaze mi rehavu mian saketon, kiu ne estas via, kaj kiu longe kunvojaĝis kun mi. Volvu la fumherbon en vian ĉifonon.

— Unu ŝtelisto meritas alian, — diris Sarumano, turnis al Gaja la dorson kaj piedbatis Vermlangon, kaj foriris al la arbaro.

— Nu, tio plaĉas efektive! — diris Grinĉjo. — Ŝtelisto, ĉu! Rio pri nia pretendo pro embuskado, vundado kaj orka trenado de ni tra Rohano.

— Ha! — diris Sam. — Kaj li diris “aĉetita”. Kiel, mi scivolas? Kaj ne plaĉis al mi tio, kion li diris pri Sud-kvarono. Jam estas tempo, ke ni revenu.

— Certe jes, — diris Frodo. — Sed ni ne povas iri pli rapide, se ni volas vidi Bilbon. Mi iros unue al Rivendelo, malgraŭ ĉio okazebla.

— Jes, mi opinias, ke vi prefere faru tion, — diris Gandalfo. — Sed ve pri Sarumano! Mi timas, ke nenio pli estas farebla pri li. Li tute velkis.

Tamen mi ne certas, ke Arbobarbo pravis; mi konjektas, ke li kapablas ankoraŭ ion misan fari laŭ maniero eta kaj malica.

Sekvatage ili venis en la nordan Dunlandon, neloĝatan sed verdan kaj agrablan terenon. Septembro komenciĝis per oraj tagoj kaj arĝentaj noktoj, kaj ili rajdis kviete ĝis ili atingis la riveron Cignorojo, kie troviĝis malnova travadejo oriente de la akvofaloj, abrupte subiĝantaj al la ebenaĵoj. Forokcidente en la nebuleto vidiĝis lagetoj kaj insuloj, kiuj serpentume vojis al Grizinundo, kie en kanoj nestis nenombreblaj cignoj.

Tiel ili venis en Eregionon, kaj finfine bela tago aŭroris, muaranta super brilaj nebuletoj; kaj rigardante de sia bivako sur malalta monteto la vojaĝantoj vidis fore en la oriento la sunon trafanta tri montopintojn, kiuj baŭmis en la ĉielon tra flosaj nuboj: Karadraso, Celebdilo kaj Fanuidolo. Ili estis proksimaj al la Pordo de Morio.

Tie ili prokrastis dum sep tagoj, ĉar alvenis la tempo de alia disiĝo, kiun ili malemis realigi. Baldaŭ Celeborno, Galadriela kaj iliaj popolanoj turniĝos orienten por iri tra la Ruĝkorna Pordo kaj suben laŭ la Dimrila Ŝtuparo al Arĝentvejno kaj al sia propra lando. Ili vojaĝis ĝis nun laŭ la okcidentaj vojoj, ĉar multo parolindis kun Elrondo kaj Gandalfo, kaj ĉi tie ili restadis interparolante kun siaj amikoj. Multfoje longe post kiam la hobitoj volviĝis en dormo, ili sidadis kune sub la steloj, revokante foririntajn epokojn kaj ĉiujn siajn ĝojojn kaj penojn en la mondo, aŭ konsiliĝante pri la tagoj venontaj. Se iu vaganto hazarde preterpasus, tiu vidus kaj aŭdus malmulton, kaj al li ŝajnus nur, ke li vidas grizajn figurojn ĉizitajn el ŝtono, memoraĵojn pri forgesitaj aferoj jam perditaj en landoj senhomaj. Ĉar ili ne moviĝis, nek parolis buŝe, rigardante de menso al menso; kaj nur iliaj briletaj okuloj moviĝis kaj ardiĝis, dum iliaj pensoj iris tien kaj reen.

Sed finfine ĉio estis dirita, kaj provizore ili denove disiĝis, ĝis estos tempo de la forpaso de la Tri Ringoj. Rapide malaperinte en la ŝtonarojn kaj la ombrojn, la grizmantelaj lorienanoj rajdis al la montaro; kaj la irontoj al Rivendelo sidis sur la monteto kaj rigardis, ĝis venis el la kreskanta nebuleto ekflagro; kaj poste ili vidis nenion pli. Frodo sciis, ke Galadriela tenis alte sian ringon en signo de adiaŭo. Sam forturnis sin kaj suspiris:

— Mi ŝatus reiri al Lorieno!

Finfine iuvespere ili venis trans la altajn erikejojn, subite, kiel ĉiam ŝajnas al vojaĝantoj, al la rando de la profunda valo de Rivendelo kaj vidis forsube la lampojn brilantajn en la domo de Elrondo. Kaj ili subeniris kaj transiris la ponton kaj alvenis la pordegon, kaj la tutan domon plenigis lumo kaj ĝoja kantado pro la hejmenveno de Elrondo.

La hobitoj unuavice, antaŭ ol manĝi, lavi sin aŭ demeti siajn mantelojn,

iris serĉi Bilbon. Ili trovis lin tute solan en lia eta ĉambro. Ĝin plenigis malordaĵo da papero kaj plumoj kaj krajonoj; sed Bilbo sidis sur seĝeto antaŭ malgranda hela fajro. Li aspektis tre maljuna, sed trankvila kaj dormema.

Li malfermis siajn okulojn kaj supren rigardis, kiam ili eniris.

— Saluton, saluton! — li diris. — Do vi revenis, ĉu? Kaj morgaŭ estos mia naskiĝdatreveno, cetere. Kiom vi lertas! Ĉu vi scias, ke mi estos cent-dudek-naŭ-jara? Kaj post ankoraŭ unu jaro, se mi travivos, mi egalos al la Maljuna Tjuko. Mi ŝatus superi lin, sed ni vidos.

Post la festado de la naskiĝtago de Bilbo la kvar hobitoj restis en Rivendelo plurajn tagojn, kaj ili multe sidis kun sia maljuna amiko, kiu pasigis la plimulton de sia tempo nun en sia ĉambro, krom por manĝi. Por tio li kutime estis tre akurata, kaj por tio li malofte ne vekiĝis ĝustatempe. Sidante ĉirkaŭ la fajro ili rakontis al li laŭvice ĉion, kion ili memoris, pri siaj vojaĝoj kaj aventuroj. Komence li ŝajnigis fari notojn, sed li ofte endormiĝis; kaj vekiĝinte li kutimis diri:

— Kiel grandioze! Kiel mirinde! Sed kie ni troviĝis?

Tiam ili daŭrigis la rakonton ekde la punkto, kie li ekdormis. La nura parto, kiu ŝajnis vere vigligi lin kaj reteni lian atenton, estis la priskribo pri la kronado kaj geedziĝo de Aragorno.

— Mi estis invitita al la edziĝfesto, kompreneble, — li diris. — Kaj mi atendis ĝin sufiĉe longe. Sed iel, kiam venis la momento, mi konstatis, ke mi havis ĉi tie multon farendan; kaj pakado estas tia ĝeno.

Kiam pasis preskaŭ du semajnoj, Frodo rigardis tra sia fenestro kaj vidis, ke nokte venis frosto, kaj la araneaĵoj similis blankajn retojn. Tiam subite li komprenis, ke li devas iri kaj adiaŭi Bilbon. La vetero estis plu trankvila kaj favora, post unu el la plej viglaj someroj laŭ memoro de la homoj. Sed venos oktobro, kaj la vetero nepre ŝanĝiĝos baldaŭ, kaj komenciĝos denove pluvo kaj ventoj. Kaj ankoraŭ estis longa vojo trairota. Tamen ne la penso pri la vetero vere agitis lin. Li sentis, ke jam estas tempo reiri al la Provinco. Ankaŭ Sam sentis tion. Ĝuste la antaŭan vesperon li diris:

— Nu, sinjoro Frodo, ni multe vojaĝis kaj multon vidis, kaj tamen mi opinias, ke ni ne trovis lokon pli bonan ol tiu ĉi. Ĉi tie troviĝas iom el ĉio, se vi min komprenas: la Provinco, kaj la Ora Arbaro, kaj Gondoro, kaj reĝodomoj, kaj tavernoj, kaj herbokampoj, kaj montoj ĉiuj intermiksitaj. Kaj tamen, ial, mi sentas, ke ni devus foriri baldaŭ. Mi zorgas pro mia avulo, se diri la veron.

— Jes, iom el ĉio, Sam, escepte de la maro, — Frodo respondis, kaj li nun ripetis tion al si: “Escepte de la maro”.

Tiun saman tagon Frodo interparolis kun Elrondo, kaj estis interkonsentite, ke ili foriru la postan matenon. Ĝojigante ilin Gandalfo diris:

— Mi opinias, ke ankaŭ mi kuniru. Minimume ĝis Brio. Mi volas vidi Buterburon.

Vespere ili iris adiaŭi Bilbon.

— Se necesas iri, vi devas, — li diris. — Mi bedaŭras tion. Vi mankos al mi. Estas agrable nur scii, ke vi troviĝas en la loko. Sed mi iĝas tre dormema.

Poste li donacis al Frodo sian mitrilan tunikon kaj Pikilon, forgesinte, ke li jam faris tion; kaj li donacis al li ankaŭ kelkajn librojn pri tradicioj, kiujn li diversokaze verkis, skribitajn en la araneaĵa manskribo, kaj etikedis ilin surkovrile: *Tradukis el la elfa B. B*.

Al Sam li donacis saketon da oro.

— Preskaŭ la lasta el la Smaŭga rikolto, — li diris. — Eble tio utilos, se vi pensas pri edziĝo, Sam.

Sam ruĝiĝis.

— Ne multon doneblan al vi, junuloj, mi havas, — li diris al Gaja kaj Grinĉjo, — krom bonaj konsiloj. — Kaj donacinte al ili sufiĉajn ekzemplojn de tio, li aldonis lastan eron provinc-maniere: — Ne lasu, ke viaj kapoj iĝu tro grandaj por viaj ĉapeloj! Se vi baldaŭ ne ĉesos kreski, vi konstatos, ke ĉapeloj kaj vestaĵoj multekostas.

— Sed se vi volas superi la Maljunan Tjukon, — diris Grinĉjo, — mi ne vidas, kial ni ne provu superi la Bovblekulon.

Bilbo ridis kaj elpoŝigis du belajn pipojn kun perlamotaj buŝpecoj kaj ligitaj per delikata arĝento.

— Pensu pri mi, kiam vi fumos ilin. La elfoj kreis ilin por mi, sed mi ne plu fumas. — Li subite klinis la kapon kaj endormiĝis por iom da tempo, kaj revekiĝinte li diris: — Nu, kie ni troviĝas? Jes, kompreneble, donacante. Kio memorigas min: kio okazis al mia ringo, Frodo, kiun vi forportis?

— Mi perdis ĝin, kara Bilbo, — diris Frodo. — Mi liberiĝis de ĝi, vi scias.

— Kiel domaĝe! — diris Bilbo. — Mi ŝatus ĝin revidi. Sed ne, kiel mi stultas! Ĝuste por tio vi iris, ĉu ne: por liberiĝi de ĝi? Sed estas tiel konfuze, ĉar tiom da aliaj aferoj ŝajnas enmiksiĝi kun tio: la aferoj de Aragorno, kaj la Blanka Konsilio, kaj Gondoro, kaj la rajdistoj, kaj suduloj, kaj olifontoj — ĉu vi vere vidis tian, Sam? — kaj kavernoj, kaj turoj, kaj oraj arboj, kaj kiu scias kio cetere. Mi evidente revenis laŭ vojo multe tro rekta el mia vojaĝo. Al mi ŝajnas, ke Gandalfo devis cirkuligi min iomete. Sed tiuokaze la aŭkcio finiĝus antaŭ ol mi revenus, kaj min trafus eĉ pli da ĝenoj. Ĉiel,

estas jam tro malfrue; kaj mi vere opinias, ke estas pli komforte sidi ĉi tie kaj aŭdi pri la tuto. La fajro tre varmkaresas ĉi tie, kaj la nutraĵoj *ege* bongustas, kaj troviĝas elfoj, kiam oni bezonas ilin. Kion plian oni povus deziri?

La Vojo ĉiam plu pilgrimas
suben de l' pordo de l' komenco.
La Vojo jam tre malproksimas,
aliaj sekvu, laŭ intenco!
Ili vojaĝon novan iru,
sed mi finfine lacpiede
jam al taverno luma stiru,
ripoz' vespera dormoscede.

Kaj dum Bilbo murmuris la lastajn vortojn, lia kapo kliniĝis al lia brusto kaj li profunde endormiĝis.

La vespero profundiĝis en la ĉambro, kaj la fajrolumo brulis pli hele; kaj ili rigardis la dormantan Bilbon kaj vidis, ke lia vizaĝo ridetas. Dum kelka tempo ili sidis silente; kaj poste Sam, ĉirkaŭrigardante en la ĉambro kaj al la ombroj flagrantaj sur la muroj, diris mallaŭte:

— Al mi ŝajnas, sinjoro Frodo, ke li ne multe verkis, dum ni forestis. Li jam neniam skribos nian historion.

Tiumomente Bilbo malfermis unu okulon, kvazaŭ li aŭdintus. Poste li vekis sin kaj diris:

— Vidu, mi tiom dormemiĝas. Kaj kiam mi disponas tempon por skribi, mi vere ŝatas nur verki poezion. Mi scivolas, mia kara Frodo, ĉu multe vin ĝenus ordigi iom la aferojn antaŭ ol foriri? Kolektu miajn notojn kaj paperojn kaj kunprenu ilin, se vi konsentas. Komprenu, ke mi ne disponas multe da tempo por elektado kaj aranĝado kaj tiel plu. Petu helpon de Sam, kaj revenu ordiginte ĉion, kaj mi trarigardos ĝin. Mi ne tro kritikemos.

— Kompreneble mi tion faros! — diris Frodo. — Kaj kompreneble mi baldaŭ revenos: ne plu estos danĝere. Reala reĝo nun estas, kaj li baldaŭ ordigos la vojojn.

— Dankon, karulo! — diris Bilbo. — Tio vere malŝarĝas mian menson.

Dirinte tion li denove profunde endormiĝis.

La postan tagon Gandalfo kaj la hobitoj adiaŭis Bilbon en lia ĉambro, ĉar ekstere estis froste; kaj poste ili adiaŭis Elrondon kaj ties tutan domanaron.

Dum Frodo staris ĉesojle, Elrondo deziris al li bonan vojaĝon, benis lin kaj diris:

— Mi opinias, Frodo, ke eble ne necesos, ke vi revenu, krom se vi

revenos tre baldaŭ. Ĉar ĉirkaŭ la sama jarsezono, kiam la folioj oros antaŭfale, serĉu Bilbon en la arbaroj de la Provinco. Mi estos kun li.

Tiujn vortojn aŭdis neniu alia, kaj Frodo konservis ilin al si.

7

Hejmenire

Finfine la vizaĝoj de la hobitoj estis turnitaj al la hejmo. Ili avidis nun vidi denove la Provincon; sed komence ili rajdis malrapide, ĉar Frodo estis maltrankvila. Kiam ili alvenis la Transpasejon de Bruineno li haltis kaj ŝajnis malema rajdi en la fluon; kaj ili rimarkis, ke dum kelka tempo liaj okuloj ŝajne ne vidis ilin aŭ ĉirkaŭajn aferojn. La tuton de tiu tago li silentis. Estis la sesa de oktobro.

— Ĉu al vi doloras, Frodo? — demandis Gandalfo kviete, dum li rajdis apud Frodo.

— Nu jes, fakte, — diris Frodo. — Temas pri mia ŝultro. La vundo doloras, kaj memoro pri la mallumo pezas sur min. Tio okazis antaŭ unu jaro de hodiaŭ.

— Ve! Ekzistas vundoj, kiuj ne estas komplete kuraceblaj.

— Mi timas, ke pruviĝos tiel ĉe la mia. Oni ne povas vere reiri. Kvankam mi eble revenos en la Provincon, ĝi ne ŝajnos sama. Mi estas vundita per tranĉilo, pikilo, dentoj kaj longedaŭra ŝarĝo. Kie mi trovos ripozon?

Gandalfo ne respondis.

Fine de la sekva tago la doloro kaj maltrankvilo estis forpasintaj, kaj Frodo denove estis gaja, tiel gaja kvazaŭ li ne memorus la nigron de la antaŭa tago. Post tio la vojaĝo progresis bone, kaj la tagoj rapide pasis; ĉar ili rajdis malstreĉe, kaj ofte ili prokrastis en la belaj arbaretoj, kie la folioj ruĝis kaj flavis en la aŭtuna sunlumo. Finfine ili atingis Veterverton; kaj tiam ekvesperiĝis, kaj la ombro de la monteto kuŝis sombre sur la vojo. Tiam Frodo petis, ke ili hastu, kaj li ne volis rigardi al la monto, sed trarajdis ĝian ombron kun la klinita kapo kaj mantelo dense surtirita. Tiunokte la vetero ŝanĝiĝis, kaj el la okcidento venis vento pluvŝarĝita, kaj tiu blovis akre kaj malvarme, kaj la flavaj folioj kirliĝis birdece en la aero. Kiam ili alvenis la Ĉetarbaron, la branĉoj estis jam preskaŭ senfoliaj, kaj kurtenego da pluvo forvualis antaŭ ili la Brian Monteton.

Tiel estis, ke proksime al la fino de sovaĝa kaj malseka vespero en la lastaj tagoj de oktobro la kvin vojaĝantoj suprenrajdis laŭ la ascenda vojo kaj alvenis la sudan enirejon de Brio. Ĝi estis firme ŝlosita; kaj la pluvo blovis sur iliajn vizaĝojn, kaj sur la malheliĝinta ĉielo preterrapidis malaltaj nuboj, kaj iliaj koroj iomete deprimiĝis, ĉar ili atendis pli entuziasman

bonvenigon.

Post kiam ili kriis multfoje, finfine elvenis pordisto, kaj ili rimarkis, ke li portas bastonegon. Li rigardis ilin timeme kaj suspekteme; sed kiam li notis la ĉeeston de Gandalfo, kaj ke ties kunuloj estas hobitoj, malgraŭ ilia stranga ekipaĵo, tiam li pligajiĝis kaj bonvenigis ilin.

— Envenu! — li diris, malŝlosante la pordon. — Ni ne restos por interŝanĝi novaĵojn ĉi tie ekstere en la malseka bruteca vespero. Sed maljuna Barlimano sendube bonvenigos vin ĉe *La Poneo*, kaj tie vi aŭdos ĉiun aŭdindaĵon.

— Kaj tie vi aŭdos pli poste ĉion, kion ni diros, kaj pli, — ridis Gandalfo. — Kiel fartas Henĉjo?

La pordisto malridetis kaj diris:

— Foriris. Sed prefere demandu Barlimanon. Bonan vesperon!

— Bonan vesperon al vi! — ili diris kaj trapasis; kaj tiam ili rimarkis, ke malantaŭ la apudvoja dornbarilo estis konstruita longa malalta kabano, kaj kelkaj homoj jam eliris kaj gapis al ili trans la barilon. Kiam ili alvenis al la domo de Vilĉjo Filikĉjo, ili vidis, ke ties dornbarilo estas ĉifita kaj neglektita, kaj ĉiuj fenestroj estis trabobaritaj.

— Ĉu vi supozas, ke vi mortigis lin per tiu pomo, Sam? — diris Grinĉjo.

— Mi ne estas tiel optimisma, sinjoro Grinĉjo, — diris Sam. — Sed mi ŝatus scii, kio okazis pri tiu kompatinda poneo. Ĝi multfoje perturbis mian menson, kaj la lupoj ululis kaj tiel plu.

Finfine ili venis al *La Pranca Poneo*, kaj almenaŭ tiu aspektis ekstere neŝanĝita; kaj malantaŭ la ruĝaj kurtenoj en la subaj fenestroj estis lumoj. Ili sonorigis, kaj Nobo venis al la pordo, kaj malfermis ĝin fendete kaj trarigardis; kaj kiam li vidis ilin starantaj sub la lampo, li eligis surprizkrion:

— Sinjoro Buterburo! Mastro! Ili revenis!

— Ho, ĉu vere? Mi faros al ili instruon, — aŭdiĝis la voĉo de Buterburo, kaj li elkuris, kaj en la mano li tenis klabon. Sed vidante, kiuj ili estas, li haltis abrupte, kaj la nigra malrido sur lia vizaĝo ŝanĝiĝis al miro kaj ĝojo.

— Nobo, vi lankapa kreteno! — li kriis. — Ĉu vi ne kapablas nomi la malnovajn amikojn? Vi ne devus tiel timigi min en la epoko malsekura. Nu, nu! Kaj de kie vi venis? Mi ne atendis revidi iun el via grupo, fakte: irinta foren en la Sovaĝejon kun tiu Paŝegulo, dum ĉeumis tiuj Nigraj Homoj. Sed mi vere ĝojas revidi vin, kaj neniun pli ol Gandalfon. Venu! Venu! Ĉu la samajn ĉambrojn, kiel antaŭe? Ili estas liberaj. Efektive, la plimultaj ĉambroj estas liberaj nun, kion mi ne kaŝos antaŭ vi, ĉar vi rimarkos tion sufiĉe senprokraste. Kaj mi kontrolos, kio estas farebla pri vespermanĝo, laŭeble baldaŭ; sed provizore iom mankas laborantoj. He, Nobo vi sintrenulo! Diru al Bobo! Ha, sed tion mi forgesis, Bobo jam foriris: iras

hejmen al sia familio nun. Nu, konduku la poneojn de la gastoj al la stalaro, Nobo! Kaj sendube vi mem kondukos vian ĉevalon al la stalo, Gandalfo. Bela besto, kiel mi diris, kiam mi la unuan fojon ekvidis ĝin. Nu, venu! Sentu vin kvazaŭ hejme!

Sinjoro Buterburo ĉiuokaze ne ŝanĝis sian parolmanieron, kaj li ŝajnis ankoraŭ vivi en senspira dismoviĝo. Kaj tamen preskaŭ neniu ĉeestis, kaj ĉio estis silenta; el la komuna ĉambro aŭdiĝis mallaŭta murmuro de ne pli ol du-tri voĉoj. Kaj vidate de pli proksime per la lumo de du kandeloj, kiujn li flamigis kaj portis antaŭ ili, la vizaĝo de la tavernisto aspektis iom sulkoplena kaj zorgotuŝita.

Li kondukis ilin tra koridoro al la salono, uzita de ili dum tiu stranga nokto antaŭ pli ol unu jaro; kaj ili sekvis lin, iom maltrankviligite, ĉar al ili ŝajnis klare, ke maljuna Barlimano bravmiene kaŝas iun ĉagrenon. La aferoj ne plu estis tiaj, kiaj ili estis antaŭe. Sed ili nenion diris kaj atendis. Kiel ili antaŭsupozis, sinjoro Buterburo venis al la salono post vespermanĝo por konstati, ĉu ĉio estis laŭ ilia deziro. Tiel certe estis: neniu malbona ŝanĝiĝo ĝis tiam okazis pri la biero kaj manĝaĵoj ĉe *La Poneo*.

— Nu, mi ne aŭdacos proponi, ke vi venu al la komuna ĉambro hodiaŭ nokte, — diris Buterburo. — Vi certe lacas; kaj ĉiuokaze ne multaj personoj estas tie hodiaŭ vespere. Sed se vi povos konsenti al mi horduonon antaŭ ol vi enlitiĝos, mi kore ŝatos iom interparoli kun vi, kviete inter ni.

— Ĝuste tion ankaŭ ni ŝatus, — diris Gandalfo. — Ni ne estas lacaj. Ni vivis malstreĉe. Ni estis malsekaj, malvarmaj kaj malsataj, sed tion vi kuracis. Venu, sidiĝu! Kaj se vi havas iom da pipherbo, ni benos vin.

— Nu, se vi mendus ion alian, mi pli kontentus, — diris Buterburo. — Ĝuste pri ĝi ni spertas malabundon pro tio, ke ni havas nur tiom, kiom ni mem kultivas, kaj tiom ne sufiĉas. Neniom estas havebla de la Provinco nuntempe. Sed mi faros laŭeble.

Kiam li revenis, li alportis al ili sufiĉon por unu-du tagoj, bulon da foliaro netranĉita.

— Sud-linĉa, — li diris, — kaj la plej bona, kiun ni havas; sed ne egalas al la Sud-kvarona, kiel mi ĉiam asertis, kvankam mi subtenas Brion rilate la plimultajn aferojn, pardonpete.

Ili sidigis lin en granda seĝo apud la lignofajro, kaj Gandalfo sidiĝis aliflanke de l' kameno, kaj la hobitoj sur malaltaj seĝoj inter ili; kaj poste ili paroladis dum multaj horduonoj kaj interŝanĝis ĉiujn novaĵojn, kiujn sinjoro Buterburo volis aŭdi aŭ komuniki. La plimulto el la aferoj rakontataj de ili nur mirigis kaj konfuzis ilian gastiganton, kaj superis lian konceptivon; kaj ili ellogis malmultajn komentojn krom: "Ĉu vi diras", ofte ripetitan malgraŭ la atesto de l' propraj oreloj de sinjoro Buterburo.

— Ĉu vi diras, sinjoro Baginzo, aŭ ĉu temas pri sinjoro Submonteto? Mi tiom konfuziĝas. Ĉu vi diras, Mastro Gandalfo? Nu, kiel strange! Kiu supozus tion en nia tempo!

Sed li ja diris multon siaflanke. La aferoj statas pli ol malbone, li kutimis diri. Komerco ne estis eĉ mezbona, ĝi estis sendiskute malbona.

— Neniu proksimiĝas nun al Brio de ekstere, — li diris. — Kaj la brianoj plejparte restas hejme kaj baras siajn pordojn. Ĉio devenas de tiuj novevenintoj kaj banditoj, kiuj komencis alveni laŭ la Verdvojo dum la pasinta jaro, kiel vi eble memoras; sed poste venis aliaj. Iuj estis nur kompatinduloj, forkurantaj de danĝero; sed la plimulto estis maliculoj, plenaj de rabemo kaj miso. Kaj okazis problemoj eĉ ĉi tie en Brio, gravaj problemoj. Nu, okazis vera interbatiĝo, kaj kelkaj estis mortigitaj, efektive mortigitaj! Se vi volas kredi min.

— Mi certe kredas, — diris Gandalfo. — Kiom da?

— Tri kaj du, — diris Buterburo, aludante la grandulojn kaj la malgrandulojn. — Kompatinda Mato Erikpiedo, kaj Raŭlo Pomodoro, kaj eta Tomĉjo Prendorno el trans la Monteto; kaj Vilĉjo Bankso el tie-supre, kaj unu el la Submontetoj el Transio: ĉiuj bonuloj, kaj ili mankas. Kaj Henĉjo Kaprofolio, kiu antaŭe gardis la okcidentan pordon, kaj tiu Vilĉjo Filikĉjo, ili intervenis flanke de la fremduloj, kaj ili foriris kun tiuj; kaj laŭ mia opinio ili enlasis ilin. Je la nokto de la interbatiĝo, mi volas diri. Kaj tio estis post kiam ni indikis al ili la pordojn kaj forpuŝis ilin: antaŭ la jarfino tio estis; kaj la batalo okazis frue en la Nova Jaro, post la peza neĝado, kiun ni spertis. Kaj nun ili iĝis rabistoj kaj loĝas ekstere, sin kaŝinte en la arbaroj aliflanke de Arĉeto, kaj en la norda sovaĝejo. Similas al io el la malbonaj pratagoj, pri kiuj diras la rakontoj, laŭ mi. Ne estas sekure sur la vojoj kaj neniu iras malproksimen, kaj oni ŝlosas la domojn je frua horo. Ni devas starigi sentinelojn ĉirkaŭ la tuta barilaro kaj postenigi multajn homojn ĉe la enirejoj nokte.

— Nu, neniu ĝenis nin, — diris Grinĉjo, — kaj ni alvenis malrapide kaj ne vaĉis. Ni supozis lasi malantaŭe ĉiujn problemojn.

— Ha, tion vi ne faris, sinjoro, iom pli bedaŭrinde, — diris Buterburo. — Sed ne mirinde, ke ili lasis vin netuŝataj. Ili ne atakas armitojn kun glavoj kaj kaskoj kaj ŝildoj kaj tiel plu. Devigus ilin pensi denove, tio. Kaj mi devas diri, ke iom konsternis min ekvidado de vi.

Tiam la hobitoj subite konstatis, ke la homoj mire rigardis ilin ne pro la surpriziĝo pri ilia reveno, sed pro miro pri ilia ekipaĵo. Ili mem tiom kutimiĝis al militado kaj rajdado en bone ekipitaj trupoj, ke ili tute forgesis pri la brila armaĵo vidiĝanta sub la manteloj, kaj pri la kaskoj de Gondoro kaj Rohano, kaj pri la belaj insignoj sur iliaj ŝildoj, kaj ke tiuj aspektus

fremdulece en ilia propra lando. Kaj ankaŭ Gandalfo nun rajdas sian altan grizan ĉevalon, tute vestita en blanko kun mantelego blua kaj arĝenta sur la tuto, kaj kun la longa glavo Glamdringo ĉe sia flanko.

— Nu, nu, se ili timas nur kvinon el ni, — Gandalfo ridis, — ni renkontis malamikojn pli malbonajn dum nia vojaĝado. Sed ĉiuokaze ili lasos vin trankvilaj nokte dum nia restado.

— Kiom longa estos tio? — diris Buterburo. — Mi ne malkonsentus, ke ni plezure havus vin ĉi tie dum kelka tempo. Vidu, ni ne kutimiĝis al tiaj problemoj; kaj ĉiuj disiruloj foriris, diras la homoj. Mi opinias, ke ĝis nun ni ne ĝuste komprenis, kion ili faris por ni. Ĉar ĉirkaŭiris io pli malbona ol rabistoj. Lupoj hurlis ĉirkaŭ la bariloj dum la pasinta vintro. Kaj en la arbaroj estis malhelaj formoj, teruraĵoj, pensoj pri kiuj fridigas la sangon. Ĉio estis tre perturba, se vi min komprenas.

— Mi supozas, ke jes, — diris Gandalfo. — Preskaŭ ĉiuj landoj estis perturbitaj lastatempe, tre perturbitaj. Sed gajiĝu, Barlimano! Vi troviĝis rande de tre grandaj problemoj, kaj mi ĝojas nur aŭdi, ke vi ne enestis pli profunde. Sed tempo pli bona estas venonta. Eble pli bona ol vi entute memoras. Revenis la disiruloj. Ni revenis kun ili. Kaj ekzistas denove reĝo, Barlimano. Baldaŭ li turnos sian atenton ĉi tien. Tiam la Verdvojo estos ree malfermita, kaj liaj kurieroj venos norden, kaj okazos venoj-iroj, kaj la malicaĵoj estos forpelitaj el la dezertejoj. Fakte la dezertejoj post kelka tempo ne plu estos dezertejoj, kaj troviĝos homoj kaj kampoj, kie iam estis sovaĝejo. Sinjoro Buterburo skuis la kapon.

— Se survoje estos kelkaj decaj respektinduloj, tio ne domaĝos, — li diris. — Sed ni deziras neniom pli da kanajlaro kaj banditoj. Kaj eksterulojn ni ne deziras en Brio, aŭ entute proksime al Brio. Ni deziras, ke oni lasu nin trankvilaj. Mi ne deziras amason da fremduloj bivakantaj ĉi tie kaj ekloĝantaj tie kaj disŝirantaj la sovaĝan terenon.

— Oni lasos vin trankvilaj, Barlimano, — diris Gandalfo. — Estas sufiĉa loko por regnoj inter Iseno kaj Grizinundo, aŭ sur la bordoj sude de Brandovino, sen ke iu loĝu interne de multtaga rajdado el Brio. Kaj multaj homoj antaŭe loĝis en fora nordo, cent mejlojn aŭ pli de ĉi tie, ĉe la fora ekstremo de la Verdvojo, sur la Nordaj Montetoj kaj apud la lago Evendimo.

— Fore ĉe Mortintula ŝtonmuro, ĉu? — diris Buterburo, mienante eĉ pli dubeme. — Tiu tereno estas hantata, oni diras. Neniu krom rabistoj irus tien.

— Tien iras la disiruloj, — diris Gandalfo. — Mortintula ŝtonmuro, laŭ vi. Tiel ĝi estas nomita dum longaj jaroj, sed ĝia ĝusta nomo, Barlimano, estas Fornosto Ereno, Norburio de la Reĝoj. Kaj la Reĝo denove venos tien

iam; kaj tiam vi havos iujn bravulojn trarajdantaj.

— Nu, tio sonas pli esperige, mi konsentas, — diris Buterburo. — Kaj tio favoros la komercadon, sendube. Kondiĉe, ke li lasos Brion trankvila.

— Li tion faros, — diris Gandalfo. — Ĝin li konas kaj amas.

— Ĉu vere? — diris Buterburo iom perpleksigite. — Tamen mi certe ne scias, kial li faru tion, sidante sur sia granda trono supre en sia kastelego, centojn da mejloj for. Kaj trinkante vinon el ora pokalo, tio ne mirigus min. Kiom koncernas lin *La Poneo* aŭ kruĉoj da biero? Malgraŭ tio, ke mia biero estas bonkvalita, Gandalfo. Ĝi estas elstare bonkvalita, post kiam vi venis en la aŭtuno de la pasinta jaro kaj aprobe traktis ĝin. Kaj tio estis konsolo inter problemoj, necesas diri.

— Ha! — diris Sam. — Sed li diras, ke via biero estas ĉiam bonkvalita.

— Li diras?

— Kompreneble, li diras. Li estas Paŝegulo. La ĉefo de la disiruloj. Ĉu vi ankoraŭ ne enkapigis tion?

Ĝi finfine enkapiĝis, kaj la vizaĝo de Buterburo estis studinde miroplena. La okuloj sur lia larĝa vizaĝo rondiĝis, kaj lia buŝo gape malfermiĝis, kaj li anhelis.

— Ĉu Paŝegulo! — li ekkriis, kiam li rehavis spirkapablon. — Tiu kun krono kaj tiel plu kaj ora pokalo! Nu, al kio ni venas?

— Al tempo pli prospera, almenaŭ en Brio, — diris Gandalfo.

— Tion mi esperas, tutcerte, — diris Buterburo. — Nu, tio estas la plej agrabla babilado, kiun mi spertis dum longega tempo. Kaj mi ne kontestas, ke mi dormos pli facile hodiaŭ nokte kaj kun pli leĝera koro. Vi donis al mi multegon pripensindan, sed tion mi prokrastos ĝis morgaŭ. Mi iras liten, kaj sendube ankaŭ vi plezure enlitiĝos. He, Nobo! — li vokis, irinte al la pordo. — Nobo, vi sintrenulo! Nobo! — li diris al si, manfrapante al si la frunton. — Nu, pri kio tio memorigas min?

— Espereble ne pri alia forgesita letero, sinjoro Buterburo? — diris Gaja.

— Nu, nu, sinjoro Brandoboko, ne memorigu min pri tio! Sed vidu, vi rompis mian pensĉenon. Nu, kie mi troviĝis? Nobo, stalaro, ha! Pri tio temas. Mi havas ion, kio apartenas al vi. Se vi memoras pri Vilĉjo Filikĉjo kaj la ĉevalrabado: tiu poneo, kiun vi aĉetis, nu, ĝi estas ĉi tie. Ĝi revenis per si mem, ĉu ne. Sed kie ĝi estintis, tion vi scias pli bone ol mi. Ĝi estis tiel vila, kiel maljuna hundo kaj svelta kiel vestaĵvergo, sed ĝi estis vivanta. Nobo prizorgis ĝin.

— Kio! Mia Vilĉjo? — kriis Sam. — Nu, mi naskiĝis bonŝanca, malgraŭ la diroj de mia Avulo. Jen plenumiĝis ankoraŭ unu deziro! Kie ĝi estas?

Sam rifuzis enlitiĝi antaŭ ol viziti Vilĉjon en la stalo.

La vojaĝantoj restadis en Brio la tutan postan tagon, kaj sinjoro Buterburo ĉiuokaze ne rajtis plendi pri sia komerco la postan vesperon. Scivolemo venkis ĉiujn tiraojn, kaj lia taverno estis plenplena. Pro ĝentileco la hobitoj vizitis la komunan ĉambron vespere kaj respondis sufiĉe multajn demandojn. Ĉar memoroj de la brianoj retenemas, oni multfoje demandis al Frodo, ĉu li verkis sian libron.

— Ankoraŭ ne, — li respondis. — Mi aktuale iras hejmen por ordigi miajn notojn. — Li promesis pritrakti la mirindajn okazintaĵojn en Brio, kaj tiel igi pli interesa libron, kiu verŝajne pritraktas ĉefe la foregajn kaj malpli gravajn aferojn “tie sude”.

Poste unu el junaj homoj postulis kanton. Sed je tio ekestis silento, kaj li estis brovume oponita, kaj la postulo ne estis ripetita. Evidente mankis deziro pri iuj malraciaj okazaĵoj en la komuna ĉambro denove.

Nenia ĝenado dumtage, nek ajna bruo dumnokte perturbis la trankvilon de Brio, dum la vojaĝantoj restadis tie; sed la postan matenon ili ellitiĝis frue, ĉar la vetero plu pluvemis, ili volis atingi la Provincon antaŭ la noktiĝo, kaj tio postulis longan rajdadon. Ĉiuj brianoj eliris por adiaŭi ilin, kaj estis pli gajhumoraj ol ili estis jam dum unu jaro; kaj tiuj, kiuj ne vidis pli frue la fremdulojn en ilia tuta ekipaĵo, gapis mire al ili: al Gandalfo kun ties blanka barbo, kaj la lumo kiu ŝajnis ekbrili de li, kvazaŭ lia blua mantelo estus nur nubo sur sunlumo; kaj al la kvar hobitoj kvazaŭ kavaliroj vagantaj el rakontoj preskaŭ forgesitaj. Eĉ tiuj, kiuj primokis ĉian paroladon pri la Reĝo, komencis pensi, ke eble en tio estas iomete da vero.

— Nu, bonŝancon al via vojo, kaj bonŝancon al via reveno hejmen! — diris sinjoro Buterburo. — Mi devas averti vin, ke ankaŭ en la Provinco ne ĉio estas en ordo, se tio, kion ni aŭdas, estas vera. Oni diras pri strangaj okazaĵoj. Sed io elpelas alion, kaj min plenokupis la pro praj ĉagrenoj. Sed se mi rajtas aŭdaci, vi revenis ŝanĝitaj el via vojaĝado, kaj jam aspektas kiel personoj kapablaj senprokraste pritrakti problemojn. Sendube vi baldaŭ ordigos ĉion. Bonŝancon al vi! Kaj ju pli ofte vi revenos, des pli kontenta mi estos.

Ili adiaŭis lin kaj forrajdis, kaj trapasis la okcidentan pordon kaj pluiris al la Provinco. Poneo Vilĉjo akompanis ilin, kaj kiel antaŭe ĝi portis sufiĉe multe da pakaĵo, sed ĝi trotis apud Sam kaj ŝajnis tute kontenta.

— Mi scivolas, kion aludis maljuna Barlimano, — diris Frodo.

— Mi povas diveni iom el ĝi, — sombre diris Sam. — Kion mi vidis en la spegulo: arbojn distranĉitajn kaj tiel plu, kaj mian Avulon forpelitan el la Vico. Mi devis reveni pli rapide.

— Kaj evidente io misas en la Suda Kvarono, — diris Gaja. — Ekzistas

ĝenerala manko de pipherbo.

— Kio ajn ĝi estas, — diris Grinĉjo, — Lodo troviĝos ĉe la fundo, pri tio vi povas esti certaj.

— Ĉefunde, sed ne plej profunde, — diris Gandalfo. — Vi forgesis pri Sarumano. Li ekinteresiĝis pri la Provinco antaŭ ol Mordoro.

— Nu, ĉeestas vi, — diris Gaja, — do la aferoj baldaŭ ordiĝos.

— Mi ĉeestas nun, — diris Gandalfo, — sed baldaŭ mi ne. Mi ne iros al la Provinco. Vi mem ordigu ĝiajn aferojn; por tio vi estas trejnitaj. Ĉu vi ankoraŭ ne komprenas? Mia tempo forpasis: ne plu estas mia tasko ordigi aferojn, nek helpi aliulojn tion fari. Kaj koncerne vin, karaj amikoj, helpon vi ne bezonos. Vi jam maturiĝis. Maturiĝis tre forte; inter la grandiozuloj vi troviĝas, kaj mi tute ne timas pro iu ajn el vi.

» Sed, se vi volas scii, mi baldaŭ flankeniros. Mi iros por longe interparoli kun Bombadiljo: tian interparolon mi neniam havis en mia tuta tempo. Li estas muskokovrito, kaj mi estis ŝtono, kies sorto estas ruliĝi. Sed miaj tagoj de ruliĝado finiĝas, kaj nun ni havos multon interparolindan.

Post kelka tempo ili alvenis la lokon sur la Orienta Vojo, kie ili adiaŭis Bombadiljon; kaj ili esperis kaj duone atendis vidi lin staranta tie por saluti ilin preterpasantajn. Sed pri li estis neniu indiko; kaj griza nebuleto kovris la Dolmenejon sude, kaj profunda vualo la foran Malnovan Arbaron.

Ili haltis kaj Frodo rigardis suden sopireme.

— Mi tre ŝatus revidi la karan maljunulon, — li diris. — Mi scivolas, kiel li fartas.

— Tiel bone, kiel ĉiam, vi povas certi, — diris Gandalfo. — Tute neĝenate; kaj laŭ mia supozo li ne multe interesiĝas pri io ajn, kion ni faris aŭ vidis, krom eble niaj vizitoj al la entoj. Eble poste vi povos viziti lin. Sed je via loko, mi nun urĝus min antaŭen al la hejmo, aŭ vi ne atingos la Brandovinan Ponton antaŭ ol la pordoj estos ŝlositaj.

— Sed pordoj ne troviĝas, — diris Gaja, — ne sur la Vojo; vi tre bone scias tion. Ekzistas la Pordo Boklanda, kompreneble; sed oni tralasos min iam ajn.

— Ne troviĝis pordoj, prefere diru, — diris Gandalfo. — Mi opinias, ke nun vi trovos pordojn. Kaj vi eble havos pli da problemoj, ol vi supozas, ĉe la Pordo Boklanda. Sed vi elturniĝos bone. Adiaŭ, karaj amikoj! Ankoraŭ ne lastfoje, ankoraŭ ne. Adiaŭ!

Li forturnis Ombrofakson de la vojo, kaj la ĉevalego transsaltis la verdan ŝtonmuron, kiu randis ĝin; kaj pro krio de Gandalfo ĝi foriris, kuregante al la Dolmenejo, kvazaŭ norda vento.

— Nu, jen ni estas, nur la kvaropo, kiu kune ekvojaĝis, — diris Gaja. — Ni ĉiujn aliajn postlasis, unu post alia. Tio ŝajnas preskaŭ sonĝo, kiu

malrapide forvelkis.

— Ne laŭ mi, — diris Frodo. — Laŭ mi tio pli similas reendormiĝon.

8

La purigado de la Provinco

Estis post la noktiĝo, kiam malsekaj kaj lacaj vojaĝantoj finfine venis al Brandovino, kaj ili trovis la vojon barita. Ambaŭflanke de la ponto estis granda pikilumita pordo; kaj aliflanke de la rivero estis videblaj kelkaj nove konstruitaj domoj: duetaĝaj kun mallarĝaj rektflankaj fenestroj, nudaj kaj malofte lumigitaj, tute sombre kaj neprovincece.

Ili bategis la eksteran pordon kaj vokis, sed komence venis neniu respondo; kaj poste, surprizante ilin, iu blovis kornon, kaj la lumoj en la fenestroj estingiĝis. Voĉo kriis en la mallumo:

— Kiu estas? Foriru! Vi ne povas enveni. Ĉu vi ne scias legi la avizon: *Eniro malpermesata inter sunsubiro kaj sunleviĝo*?

— Kompreneble ni ne povas legi la avizon en la mallumo, — Sam rekriis. — Kaj se hobitoj de la Provinco estas forbarotaj en pluvado dum tia nokto, mi deŝiros vian avizon, kiam mi trovos ĝin.

Tiam fenestro batfermiĝis, kaj amaso da hobitoj kun lanternoj elverŝiĝis el la domo maldekstre. Tiuj malfermis la foran pordon, kaj kelkaj transpontiĝis. Vidante la vojaĝantojn ili ŝajnis timigitaj.

— Ekagu tuj! — diris Gaja, rekoninte unu el la hobitoj. — Se vi ne konas min, Hobo Fojnvardo, tion vi devus. Mi estas Gaja Brandoboko, kaj mi ŝatus scii, pri kio temas ĉio ĉi, kaj kion faras ĉi tie boklandano kia vi. Vi pli frue postenis ĉe la Fojna Pordo.

— Benata mi estu! Vi estas sinjoro Gaja, certe, kaj tute vestita por batalado! — diris maljuna Hobo. — Vidu, oni diris, ke vi estas mortinta. Perdita en la Malnova Arbarego, laŭ la informoj. Mi ŝatas revidi vin vivanta malgraŭe!

— Do ĉesigu la gapadon al mi tra la stangoj, kaj malfennu la pordon! — diris Gaja.

— Mi bedaŭras, sinjoro Gaja, sed al ni estas ordonite.

— De kiu?

— De la Ĉefo supre en Bag-Endo.

— ĉefo! ĉefo? ĉu vi aludas sinjoron Lodo? — diris Frodo.

— Supozeble, sinjoro Baginzo, sed nun ni devas diri nur “la Ĉefo”.

— Ĉu vere tiel! — diris Frodo. — Nu, mi ĝojas, ke almenaŭ li nuligis la Baginzon. Sed evidente urĝas, ke la familio pritraktu lin kaj remetu lin sur lian ĝustan lokon.

La hobitoj aliflanke de la pordo silentiĝis.

— Bono ne rezultos el tiaj paroloj, — iu diris. — Li aŭdos pri tio. Kaj se vi tiom bruos, vi vekos la grandulon de la Ĉefo.

— Ni vekos lin laŭ maniero, kiu surprizos lin, — diris Gaja. — Se vi aludas ke via Ĉefaĉo dungis banditojn el la sovaĝejo, do ni revenis ne tro frue. — Li saltis de sur sia poneo, kaj vidante la avizon per la lumo de la lanternoj, li deŝiris ĝin kaj ĵetis ĝin trans la pordon. La hobitoj retropaŝis kaj ne moviĝis por malfermi ĝin. — Ek al, Grinĉjo! — diris Gaja. — Sufiĉas du.

Gaja kaj Grinĉjo transgrimpis la pordon, kaj la hobitoj forkuris. Denove korno sonoris. El la pli granda domo dekstre aperis granda peza figuro antaŭ lumo en la pordejo.

— Kio okazaĉas? — li minace murmuris irante antaŭen. — Ĉu pordorompado? Foriru, aŭ mi rompos al vi viajn fiajn kolojn! — Poste li haltis, ĉar li ekvidis la brileton de glavoj.

— Vilĉjo Filikĉjo, — diris Gaja, — se vi ne malfermos tiun pordon en dek sekundoj, vi tion bedaŭros. Mi kontraŭmetos al vi ŝtalon, se vi ne obeos. Kaj malferminte la pordon, vi trairos ĝin kaj neniam revenos. Vi estas bandito kaj vojrabisto.

Vilĉjo Filikĉjo tikis kaj ŝovpaŝis al la pordo kaj ĝin malŝlosis.

— Donu al mi la ŝlosilon! — diris Gaja.

Sed la bandito ĵetis ĝin al lia kapo kaj poste forkuris en la mallumon. Kiam li preterpasis la poneojn, unu el ili batis per siaj kalkanoj kaj trafis lin kurantan. Li malaperis kun jelpo en la nokton, kaj oni neniam plu aŭdis pri li.

— Nete farite, Vilĉjo, — diris Sam al sia poneo.

— Tiom pri via grandulo, — diris Gaja. — Ni vidos la Ĉefon poste. Intertempe ni bezonas tranoktejon, kaj ĉar ŝajnas, ke vi detruis la Pontan Hotelon kaj konstruis tiun ĉi mizeran lokon anstataŭe, vi devos loĝigi nin.

— Mi bedaŭras, sinjoro Gaja, — diris Hobo, — sed tio estas malpermesata.

— Kio estas malpermesata?

— Akceptado de personoj improvize, kaj aldona konsumado de manĝaĵoj kaj simile, — diris Hobo.

— Kio okazas en tiu ĉi loko? — diris Gaja. — Ĉu la jaro estis malfekunda, aŭ kio? Mi opiniis, ke la somero kaj la rikolto estis bonegaj.

— Nu, ne, la jaro sufiĉe fekundis, — diris Hobo. — Ni kreskigis multe da manĝaĵo, sed ni ne scias certe, kio okazis al ĝi. Temas pri tiuj “kolektantoj” kaj “dividantoj”, laŭ mia opinio, kiuj ĉirkaŭiras kalkulante, mezurante kaj forprenante al konservejoj. Ili pli kolektas ol dividas, kaj la

pliparton el la varoj ni neniam plu vidas.

— Ho sufiĉe! — diris Grinĉjo oscedante. — Ĉio ĉi estas por mi tro laciga hodiaŭ nokte. Ni havas manĝaĵojn en niaj sakoj. Simple donu al ni ĉambron, en kiu ni kuŝiĝu. Ĝi estos pli bona ol kelkaj lokoj, kiujn mi vidis.

La hobitoj ĉe la pordo ankoraŭ ŝajnis maltrankvilaj, evidente iu aŭ alia regulo estis rompita; sed ne eblis kontraŭstari kvar vojaĝantojn tiel komandecajn, ĉiuj armitaj, kaj du el ili nekutime grandaj kaj fort-aspektaj. Frodo ordonis, ke la pordo estu reŝlosita. Ĉiuokaze estis iom da sagaco en retenado de gardistoj, dum banditoj ankoraŭ ĉirkaŭumis. Poste la kvar kunuloj eniris la hobitan gardistejon kaj faris sin laŭeble komfortaj. Tio estis loko malbela kaj senenhava, kun magra fajrujo, kiu ne permesis taŭgan fajron. En la supraj ĉambroj estis etaj vicoj da malmolaj litoj, kaj sur ĉiu muro estis avizo kaj listo de Reguloj. Tiujn Grinĉjo deŝiris. Mankis biero, kaj troviĝis nur malmulte da nutraĵo, sed kun tio, kion la vojaĝantoj alportis kaj disdividis, ili manĝis sufiĉe bone; kaj Grinĉjo rompis Regulon 4, metinte sur la fajron pliparton de la morgaŭa lignoporcio.

— Nu, do, kio pri fumado, dum vi rakontas al ni la okazintaĵojn en la Provinco? — li demandis.

— Ne ekzistas pipherbo nun, — diris Hobo, — krom nur por la servistoj de la Ĉefo. Ĉiuj stokoj verŝajne malaperis. Ni fakte aŭdis, ke furgonoj plenaj de ĝi foriris laŭ la malnova vojo el Sud-kvarono, tie apud la Sarna Transpasejo. Tio estis ĉirkaŭ la fino de la pasinta jaro, post kiam vi foriris. Sed ĝi diskrete foriris antaŭ tiam, malgrandkvante. Tiu Lodo...

— Nu fermu la faŭkon, Hobo Fojnvardo! — kriis pluraj aliaj. — Vi scias, ke tiaj paroloj estas malpermesataj. La Ĉefo aŭdos pri tio, kaj ni ĉiuj sidos en kaĉo.

— Nenion li aŭdus, se iuj el vi ne estus fidenunculoj, — arde rediris Hobo.

— Bone, bone! — diris Sam. — Tio tute sufiĉas. Mi volas nenion plian aŭskulti. Neniu bonvenigo, neniom da biero, neniom da fumado, kaj multaj reguloj anstataŭe kaj orka parolado. Mi esperis ĝui ripozon, sed mi konstatas, ke antaŭ ni estas laboro kaj problemoj. Ni dormu kaj forgesu tion ĝis la mateno!

La nova “Ĉefo” evidente havis rimedon por akiri informojn. Estis minimume kvardek mejloj de la Ponto ĝis Bag-Endo, sed iu plenumis la aliron haste. Tion Frodo kaj liaj amikoj baldaŭ spertis.

Ili nenion difinitan planis, sed pensis malprecize pri kuna irado unue al Stretkavo kaj iom da restado tie. Sed nun, konstatinte la aspekton de la aferoj, ili decidis iri rekte al Hobiturbo. Do la postan tagon ili ekiris laŭ la Vojo kaj trotis senŝancele antaŭen. La vento malfortiĝis sed la ĉielo estis

griza. La tereno aspektis iom malĝoja kaj forlasita; sed tamen estis la unua de novembro kaj la lastaj tagoj de l' aŭtuno. Tamen ŝajnis, ke kvanto nekutima de brulado okazas, kaj fumo leviĝis el multaj lokoj ĉirkaŭe. Nubego da ĝi supreniris malproksime en la direkto de Arbarfino.

Kiam vesperiĝis, ili proksimiĝis al Frogmortono, vilaĝo sur la vojo mem, ĉirkaŭ dudek du mejlojn de la Ponto. Tie ili intencis tranokti; *La Flosanta Arbotrunko* en Frogmortono estis bonkvalita hotelo. Sed kiam ili venis al la orienta ekstremo de la vilaĝo, ili renkontis barieron kun granda avizo NENIA TRAPASO; kaj malantaŭ ĝi staris granda bando da ŝirifoj kun bastonoj en la manoj kaj plumoj sur la ĉapeloj, aspektante samtempe gravaj kaj iom timigitaj.

— Kion signifas tio ĉi? — diris Frodo, sentante emon ridi.

— Jen kion ĝi signifas, sinjoro Baginzo, — diris la estro de la ŝirifoj, hobito du-pluma: — Vi estas arestitaj pro Pordorompo, kaj ŝirado de la Reguloj, kaj Atako al Pordistoj kaj Senrajta Eniro, kaj Senpermesa Dormado en Provincaj Konstruaĵoj, kaj Subaĉeto de Gardistoj per Nutraĵo.

— Kaj pro kio cetera? — demandis Frodo.

— Tio provizore sufiĉas, — diris la ŝirifestro.

— Mi povas aldoni kelkajn aliajn, se vi volas, — diris Sam. — Insultado de la Ĉefo kun Deziro pugnobati lian Pustulan Vizaĝon, kaj Penso ke vi Ŝirifoj aspektas kiel Bando da Idiotoj.

— Vidu, sinjoro, tio sufiĉas. La Ĉefo ordonis, ke vi akompanu nin trankvile. Ni kondukos vin al Apudakvo kaj transdonos vin al la ĉefanaro, kaj kiam li prijuĝos vian aferon, vi rajtos diri viajn vortojn. Sed se vi ne volas resti en la Ŝlostruoj pli longe ol necese, mi konsilas mallongigi la diron, kiel farus mi sur via loko.

Perturbante la ŝirifojn, Frodo kaj liaj kunuloj ĉiuj ridegis.

— Ne parolu absurde! — diris Frodo. — Mi iros, kien plaĉos al mi, kaj laŭ mia propra horaro. Hazarde mi iros al Bag-Endo pri miaj aferoj, sed se vi insistas kuniri, nu, tio estas via afero.

— En ordo, sinjoro Baginzo, — diris la estro, forŝovante la barieron. — Sed ne forgesu, ke mi arestis vin.

— Mi ne forgesos, — diris Frodo. — Neniam. Sed mi eble pardonos vin. Nu, hodiaŭ mi ne iros plu, do se vi bonvolos akompani min al *La Flosanta Arbotrunko*, mi estos dankema.

— Tion mi ne povas fari, sinjoro Baginzo, la hotelo estas fermita. Troviĝas ŝirifejo ĉe la fino de la vilaĝo. Mi gvidos vin tien.

— Bone, — diris Frodo. — Iru vi, kaj ni sekvos.

Sam estis rigardinta atente la ŝirifojn kaj ekvidis iun, kiun li konis.

— He, venu ĉi tien, Robino Kavaĵeto! — li vokis. — Mi volas paroli

kun vi.

Post embarasa ekrigardo al sia estro, kiu mienis kolere sed ne aŭdacis interveni, ŝirifo Kavaĵeto retroiris kaj marŝis apud Sam, kiu descendis de sia poneo.

— Aŭskultu, Robĉjo! — diris Sam. — Vi estas hobito edukita kaj devus esti pli sagaca, sed ne ĝeni sinjoron Frodo kaj tiel plu. Kaj kio estas pri la fermado de la hotelo?

— Ili ĉiuj estas fermitaj, — diris Robino. — La Ĉefo ne aprobas bieron. Almenaŭ pro tio komenciĝis. Sed nun mi supozas, ke liaj homoj havas la tuton. Kaj li ne aprobas translokiĝon de personoj; se ili deziras aŭ devas, ili tiam devas viziti la ŝirifejon por klarigi sian aferon.

— Vi devus honti pri okupiĝo en tia galimatio, — diris Sam. — Pli frue vi mem preferis internon de trinkejo ol la eksteron. Vi senĉese estadis tie, ĉu dumdeĵore, ĉu eksterdeĵore.

— Kaj tion mi farus ankaŭ nun, Sam, se estus eble. Sed ne traktu min severe. Kion mi povus fari? Vi scias, ke mi registriĝis kiel ŝirifo antaŭ sep jaroj, antaŭ ol komenciĝis ĉio ĉi. Por havi eblecon promeni tra la lando kaj viziti personojn, kaj aŭdi novaĵojn, kaj scii kie troviĝas la plej bona biero. Sed nuntempe estas alie.

— Sed vi povus rezigni, ĉesigi la ŝirifadon, se ĝi ne plu estas okupiĝo respektinda, — diris Sam.

— Ne estas permesate, — diris Robino.

— Se mi aŭdos *ne permesate* pli ofte, mi estiĝos kolera.

— Mi ne diras, ke mi bedaŭrus tion, — diris Robino mallaŭtigante la voĉon. — Se ni ĉiuj koleriĝus samtempe, eble io fareblus. Sed temas pri tiuj homoj, Sam, la homoj de la Ĉefo. Li ĉirkaŭsendas ilin ĉien, kaj se iu el ni malgravuloj postulas siajn rajtojn, ili fortrenas tiun al la ŝlostruoj. Unue ili prenis la maljunan Farunbulon, maljunan Vilĉjon Blankpiedo la Urbestron, kaj ili prenis multajn aliajn. Lastatempe iĝis eĉ pli malbone. Nun ili ofte batas personojn.

— Do kial vi plenumas ilian laboron? — diris Sam kolere. — Kiu sendis vin al Frogmortono?

— Neniu. Ni loĝas ĉi tie en la granda ŝirifejo. Ni estas jam la Unua Orient-kvarona Trupo. Ekzistas entute centoj da ŝirifoj, kaj pliaj estas deziratoj, pro ĉiuj ĉi novaj reguloj. La plimulto aliĝis malvolonte, sed ne ĉiuj. Eĉ en la Provinco estas iuj, kiuj ŝatas enmiksiĝi en aferojn de aliaj kaj fanfaroni. Kaj eĉ pli malbone: troviĝas kelkaj, kiuj agadas spione por la Ĉefo kaj ties homoj.

— Ha! Do tiel vi sciiĝis pri ni, ĉu?

— Vi pravas. Ne estas permesate al ni nun sendi per ĝi, sed ili utiligas la

malnovan Kurieran Servon, kaj postenigas diversloke specialajn kuristojn. Unu el ili venis hieraŭ vespere kun “sekreta mesaĝo” el Blanksulko, kaj alia pluportis ĝin de ĉi tie. Kaj mesaĝo revenis hodiaŭ posttagmeze, kiu diris, ke vi estu arestotaj kaj kondukotaj al Apudakvo, ne rekte al la Ŝlostruoj. Evidente la Ĉefo deziras vidi vin tuj.

— Li ne estos tiel entuziasma, kiam sinjoro Frodo fintraktos lin, — diris Sam.

La ŝirifejo en Frogmortono estis tiel mizera kiel la Pontodomo. Ĝi havis nur unu etaĝon, sed ĝi havis similajn mallarĝajn fenestrojn, kaj ĝi estis konstruita el malbelaj palaj brikoj, mallerte starigitaj. Interne ĝi estis malseketa kaj senĝoja, kaj vespermanĝo estis dismetita sur longa nuda tablo, kiu jam de semajnoj ne estis brospurigita. La manĝaĵoj ne meritis lokon pli belan. La vojaĝantoj ĝojis forlasi la ejon. Estis proksimume dek ok mejloj ĝis Apudakvo, kaj ili ekiris je la deka matene. Ili ekirus pli frue, sed la prokrasto tiel klare ĝenis la ŝirifestron. La okcidenta vento jam turniĝis norden kaj la tago estis malpli varma, sed la pluvo ĉesis.

La kavalkado, kiu forlasis la vilaĝon, estis iom komika, kvankam malmultaj personoj venintaj por gapi al la kostumoj de la vojaĝantoj, ne ŝajnis tutcertaj, ĉu la ridado estas permesata. Dekduo da ŝirifoj estis difinitaj kiel eskortantoj de la “arestitoj”; sed Gaja devigis ilin marŝi antaŭe, dum Frodo kaj liaj amikoj rajdis poste. Gaja, Grinĉjo kaj Sam sidis malstreĉe ridante, parolante kaj kantante, dum la ŝirifoj plandis antaŭen penante aspekti severaj kaj gravaj. Frodo tamen silentis kaj aspektis iom malĝoja kaj pensema.

La lasta persono, kiun ili preterpasis, estis fortika maljunulo, kiu tondis heĝon. Li moksalutis:

— Ha, saluton! Jam kiuj arestis kiujn?

Du el la ŝirifoj tuj elpaŝis el la trupo kaj sin direktis al li.

— Estro, — diris Gaja. — Ordonu, ke viaj uloj reiru tuj al siaj lokoj, se vi ne preferas, ke pritraktu ilin mi!

La du hobitoj pro akra komando de la estro revenis paŭte.

— Nun antaŭen! — diris Gaja, kaj poste la vojaĝantoj certigis, ke la paŝado de la poneoj sufiĉe rapidis por peli la ŝirifojn laŭeble haste. La suno aperis, kaj malgraŭ la frosteta vento, ili baldaŭ spiregis kaj ŝvitis.

Ĉe la Trikvarona Ŝtono ili rezignis. Ili iris preskaŭ dekkvar mejlojn kun nur unu ripozeto tagmeze. Estis nun la tria horo. Ili estis malsataj, kaj la piedoj tre doloris ilin, kaj ili ne povis toleri la haston.

— Nu, venu laŭ propra rapideco! — diris Gaja. — Ni pluiras.

— Ĝis la, Robĉjo! — diris Gaja. — Mi atendos vin apud *La Verda Drako*, se vi ne forgesis, kie ĝi troviĝas. Ne malrapidumu survoje!

— Vi defias areston, jen kion vi faras, — malgaje diris la estro, — kaj mi ne povas respondeci.

— Ni defios sufiĉe multajn aferojn ankoraŭ, kaj ne petos vin respondeci, — diris Grinĉjo. — Bonan ŝancon al vi!

La vojaĝantoj trotis antaŭen, kaj kiam la suno eksinkis al la Blankaj Suprejoj fore ĉe la okcidenta horizonto, ili venis al Apudakvo apud ties larĝa Akvo; kaj tie ili la unuan fojon vere dolore ŝokiĝis. Tiu ĉi estis la hejmtereno de Frodo kaj Sam, kaj nun ili konstatis, ke ili amas ĝin pli ol iun ajn alian lokon en la mondo. Multaj el la domoj konataj de ili malaperis. Iuj ŝajnis bruligitaj. La agrabla vico de malnovaj hobitaj truoj en la monteto norde de la lago estis forlasita, kaj iliaj ĝardenetoj, kiuj antaŭe etendiĝis gaje al la akvorando, estis fetore plenaj je trudherbaro. Pli malbone, troviĝis tuta vico de la malbelaj novaj domoj laŭlonge de la lagflanko, kie la Hobiturba Vojo kondukis proksime al la monteto. Arba avenuo pli frue staris tie. Ili ĉiuj forestis. Kaj rigardante konsternite laŭ la vojo al Bag-Endo ili vidis altan brikan tubon en la foro. Tiu elverŝis nigran fumon en la vesperan aeron.

Sam ege perturbiĝis.

— Mi iros rekte pluen, sinjoro Frodo, — li kriis. — Mi iras vidi, pri kio temas. Mi deziras trovi mian Avulon.

— Unue ni devas eltrovi, kio atendas nin, Sam, — diris Gaja. — Mi konjektas, ke la "Ĉefo" havas trupon da banditoj en la proksimo. Ni prefere trovu iun, kiu sciigos nin, kiel statas la aferoj en la ĉirkaŭaĵo.

Sed en la vilaĝo Apudakvo ĉiuj domoj kaj truoj estis fermitaj, kaj neniu salutis ilin. Ili miris pri tio, sed ili baldaŭ trovis la kialon. Kiam ili atingis *La Verdan Drakon*, la lastan konstruaĵon sur la Hobiturba flanko, nun senvivan kaj kun frakasitaj fenestroj, ili perturbiĝis vidante sesopon da grandaj misaspektaj homoj, apogantaj sin al la hotela muro; tiuj estis strabaj kaj flavpalaj.

— Similaj al tiu amiko de Vilĉjo Filikĉjo en Brio, — diris Sam.

— Similaj al multaj, kiujn mi vidis ĉe Isengardo, — murmuris Gaja.

La banditoj havis klabojn en la manoj kaj kornojn ĉe la zonoj, sed aliajn armilojn ili ne havis videble. Kiam la vojaĝantoj alrajdis, ili forlasis la muron kaj marŝis sur la vojon, barinte tiun.

— Kien vi iras, laŭ via opinio? — diris unu, la plej granda kaj plej misaspekta en la grupo. — Ne estas plu vojo por vi. Kaj kie estas tiuj valoraj ŝirifoj?

— Alvenas laŭorde, — diris Gaja. — Iomete doloras la piedoj, eble. Ni promesis atendi ilin ĉi tie.

— Ha, kion mi diris? — diris la bandito al siaj kunuloj. — Mi diris al

Ŝarko, ke ne utilas fidi al tiuj etaj stultuloj. Oni devis sendi kelkajn niajn homojn.

— Kaj kiel tio farus diferencon, mi petas? — diris Gaja. — Ni ne kutimiĝis al vojrabistoj en tiu ĉi lando, sed ni scias, kiel trakti ilin.

— Ĉu vojrabistoj? — diris la viro. — Do tiel vi sintenas, ĉu? ŝanĝu tion, aŭ ni ŝanĝos ĝin favore al vi Vi etularo iĝas tro impertinentaj. Ne tro fidu al la bonkoro de la Estro. Jam venis ŝarko, kaj li faros laŭ ordonoj de ŝarko.

— Kaj kio do estas tio? — demandis Frodo kviete.

— Tiu ĉi lando estas vekenda kaj ordigenda, — diris la bandito, — kaj tion aranĝos ŝarko; kaj li dolorigos, se vi devigos lin. Vi bezonas Estron pli grandan. Kaj tian vi ricevos antaŭ la jarfino, se vi kaŭzos pliajn problemojn. Tiam vi ellernos kelkajn aferojn, vi, ratetaro.

— Ĉu vere. Mi ĝojas aŭdi pri viaj planoj, — diris Frodo. — Mi estas survoje por viziti sinjoron Lodo, kaj eble ankaŭ li interesiĝos pri ili.

La bandito ridis:

— Lodo! Li scias tre bone. Ne zorgu. Li agos laŭ la ordonoj de Ŝarko. Ĉar se Estro iĝis ĝena, ni povas ŝanĝi lin. Ĉu komprenite? Kaj se etuloj provas enŝoviĝi tien, kie oni ne deziras ilin, ni povas izoli ilin de la misagado. Ĉu komprenite?

— Jes, mi komprenas, — diris Frodo. — Ekzemple, vi ĉi tie estas eksmodaj, kaj vi ne konas la novaĵojn. Okazis multo, post kiam vi forlasis la sudon. Finiĝis via epoko, kaj tiu de ĉiuj ceteraj banditoj. La Malhela Turego estas falinta, kaj troviĝas Reĝo en Gondoro. Kaj Isengardo estas detruita, kaj via mastraĉo estas almozulo en la sovaĝejo. Mi pasis lin survoje. Nun rajdos laŭ la Verdvojo kurieroj de la Reĝo, ne tiranoj el Isengardo.

La viro fikse rigardis lin kaj ridetis.

— Almozulo en la sovaĝejo! — li mokis. — Ha, ĉu vere? Paradaĉu, paradaĉu, eta kokerikulo. Sed tio ne malhelpos nin loĝadi en tiu ĉi grasa landeto, kie vi tro longe nenion faradis. Kaj... — li klakigis siajn fingrojn antaŭ la vizaĝo de Frodo. — Reĝaj kurieroj, ĉu? Tion al ili! Kiam mi vidos unu el ili, mi eble atentos.

Tio troincitis Grinĉjon. Liaj pensoj reiris al la kampo de Kormaleno, kaj jen straba fiulo nomas la Ringoportinton “eta kokerikulo”. Li ŝovis malantaŭen sian mantelon, elingigis sian glavon, kaj la arĝento kaj zibelkoloro de Gondoro ekbrilis sur li, kiam li rajdis antaŭen.

— Mi estas kuriero de la Reĝo, — li diris. — Vi alparolas amikon de la Reĝo, unu el la plej famaj en ĉiuj landoj de la okcidento. Vi estas bandito kaj stultulo. Genuiĝu sur la vojo kaj pardonpetu, aŭ mi enigos ĉi tiun trolan plagon en vin!

La glavo briletis en la okcidenta sunlumo. Ankaŭ Gaja kaj Sam elingigis

siajn glavojn kaj alrajdis subtene al Grinĉjo; sed Frodo ne moviĝis. La banditoj retropaŝis. Timigado de briaj kamparanoj, kaj tiranado de konfuzitaj hobitoj estintis ilia laboro. Sentimaj hobitoj kun helaj glavoj kaj severaj vizaĝoj estis granda surprizo. Kaj en la voĉoj de la venintoj estis noto, kiun pli frue ili ne aŭdis. Tiu frostigis ilin pro timo.

— Iru! — diris Gaja. — Se vi denove ĝenos tiun ĉi vilaĝon, vi tion bedaŭros.

La tri hobitoj antaŭen iris, kaj tiam la banditoj turniĝis kaj fuĝis, forkurante laŭ la Hobiturba vojo, sed kurante ili blovis siajn kornojn.

— Nu, ne tro frue ni revenis, — diris Gaja.

— Eĉ ne unu tagon pli frue. Eble tro malfrue, ĉiuokaze por savi Lodon, — diris Frodo. — Mizera stultulo, sed mi kompatas lin.

— Ĉu savi Lodon? Kion vi volas diri? — diris Grinĉjo. — Detrui lin, prefere diru.

— ŝajnas al mi, ke vi ne tute komprenas la aferojn, Grinĉjo, — diris Frodo. — Lodo neniam intencis, ke la aferoj atingu tiun staton. Li estis malica idioto, sed nun li estas kaptita. La banditoj superas, kolektante, rabante kaj tiranante, kaj regante aŭ ruinigante ĉion laŭplaĉe, en lia nomo. Kaj eĉ ne en lia nomo multe pli longe. Li estas karcerigito en Bag-Endo nun, laŭ mia supozo, kaj tre terurita. Ni devus provi liberigi lin.

— Nu, mi estas konsternita! — diris Grinĉjo. — El ĉiuj eblaj finoj de nia vojaĝado, tiu estas la plej lasta, kiun mi atendus: devi batali kontraŭ duonorkoj kaj banditoj en la Provinco mem — por elsavi Lodon Pustulon!

— Ĉu batali? — diris Frodo. — Nu, supozeble tio povos okazi. Sed memoru: ne okazu mortigo de hobitoj, eĉ se iuj aliĝis al la kontraŭa partio. Vere aliĝis, mi volas diri; ne nur obeis ordonojn banditajn estante timigitaj. Neniu hobito iam ajn mortigis alian intence en la Provinco, kaj tio ne komenciĝu nun. Kaj neniu estas mortigota entute, se eblas tion eviti. Regu viajn temperamentojn kaj retenu viajn manojn ĝis la lasta ebla momento!

— Sed se tiuj banditoj multnombras, — diris Gaja, — tio certe signifos bataladon. Vi ne elsavos Lodon aŭ la Provincon, per nura ŝokiĝo aŭ malĝojo, mia kara Frodo.

— Ne, — diris Grinĉjo. — Ne estos tiel facile timigi ilin la duan fojon. Ili estis surprizitaj. Ĉu vi aŭdis tiun kornoblovadon? Evidente troviĝas aliaj banditoj proksime. Ili estos multe pli kuraĝaj, kiam kuniĝos multaj el ili. Ni devas pripensi noktan sinkaŝadon. Finfine ni estas nur kvar, eĉ se ni estas armitaj.

— Jen ideo, — diris Sam. — Ni iru al la domo de Tom Kotono en la Suda Vojeto! Li ĉiam estis bravulo. Kaj li havas multajn knabojn, kiuj estas ĉiuj amikoj miaj.

— Ne! — diris Gaja. — Ne utilas “nokta sinkaŝado”. Ĝuste tion farus personoj, kaj ĝuste tio plaĉas al la banditoj. Ili simple alsturmos nin multnombre, enanguligos nin, kaj poste nin elpelos aŭ bruligos interne. Ne, ni devos fari ion senprokraste.

— Fari kion? — diris Grinĉjo.

— Agiti la Provincon! — diris Gaja. — Jam nun! Veki nian tutan popolon! Ili malamas ĉion ĉi, tion oni vidas: ĉiuj krom eble unu-du banditoj, kaj kelkaj stultuloj, kiuj celas graviĝi, sed ne tute komprenas, kio efektive okazas. Sed provincanoj tiel longe vivis komforte, ke ili ne scias, kion fari. Necesas nur alumeto, kaj ili ekflamiĝos. Certe la viroj de la Ĉefo scias tion. Ili provos stamfi nin kaj estingi nin rapide. Ni disponas nur tre mallongan tempon. Sam, vi rajtas kuri al la bieno de Kotono, se vi volas. Li estas la ĉefa persono en la ĉirkaŭaĵo, kaj la plej brava. Ek al! Mi intencas blovi la kornon de Rohano kaj aŭdigi al ili muzikon, kian ili neniam antaŭe aŭskultis.

Ili rajdis denove en la mezon de la vilaĝo. Tie Sam iris flanken kaj forgalopis laŭ la vojeto, kiu kondukis suden al la bieno de Kotono. Li ne tre foris, kiam li aŭdis subitan klaran kornblovon sonoranta supren en la ĉielon. Malproksimen trans montetojn kaj kampojn ĝi reeĥis; kaj tiel deviga estis tiu voko, ke Sam mem preskaŭ turniĝis kaj retrokuris. Lia poneo baŭmis kaj henis.

— Antaŭen, knabo! Antaŭen! — li kriis. — Ni baldaŭ reiros. Poste li aŭdis, ke Gaja ŝanĝas la tonon, kaj aŭdiĝis la kornkrio de Boklando, skuanta la aeron:

Vekiĝu! Vekiĝu! Timo, Fajro, Malamikoj! Vekiĝu! Fajro, Malamikoj! Vekiĝu!

Malantaŭe Sam aŭdis tumulton de voĉoj, bruegon kaj batfennadon de pordoj. Antaŭ li lumoj alsaltis el la krepusko; hundoj bojis; piedoj proksimiĝis kurante. Antaŭ ol li atingis la finon de la vojeto, aperis terkulturisto Kotono kun tri siaj filoj: juna Tom, Ĝoja kaj Nibĉjo, rapidantaj liadirekten. En la manoj ili tenis hakilojn kaj baris al li la vojon.

— Ne! Tiu estas ne bandito, — Sam aŭdis diri la terkulturiston. — Tiu laŭmezure estas hobito, sed tre strange vestita. — Poste li kriis: — He! Kiu vi estas, kaj kio estas tiu tumulto?

— Mi estas Sam, Sam Vato. Mi revenis.

Terkulturisto Kotono venis proksimen kaj fikse rigardis lin en la krepusko.

— Nu, — li ekdiris. — La voĉo estas ĝusta, kaj via vizaĝo ne pli malbelas ol antaŭe, Sam. Sed mi preterpasus vin surstrate pro via ekipaĵo.

Vi estis eksterlande, verŝajne. Mi timis, ke vi mortis.

— Morta mi ne estas! — diris Sam. — Ankaŭ ne sinjoro Frodo. Li estas ĉi tie kun siaj amikoj. Kaj tio klarigas la tumulton. Ili agitas la Provincon. Ni elpelos tiujn banditojn, kaj ankaŭ ties Ĉefon. Ni komencas jam nun.

— Bone, bone! — kriis terkulturisto Kotono. — Do finfine komenciĝas! Mi jukis aktivi la tutan jaron, sed personoj ne volis helpi. Kaj mi devis pripensi mian edzinon kaj Rozinjon. Tiuj banditoj kapablas ĉion. Sed jam ek al, knaboj! Apudakvo ekagas! Ni devas partopreni!

— Sed kio pri sinjorino Kotono kaj Rozinjo? — demandis Sam. — Ne estas ankoraŭ sendanĝere lasi ilin tute solaj.

— Mia Nibzo estas kun ili. Sed vi rajtas iri helpi lin, se vi emas, — diris terkulturisto Kotono larĝridete. Poste li kaj liaj filoj forkuris al la vilaĝo.

Sam rapidis al la domo. Apud la larĝa ronda pordo supre de la ŝtupoj el la kortego staris sinjorino Kotono kaj Rozinjo, kaj Nibzo antaŭ ili tenante fojnoforkegon.

— Estas mi! — Sam kriis altrotante. — Sam Vato! Do ne provu piki min, Nibzo. Cetere mi portas kirason.

Li salte elseliĝis kaj supreniris la ŝtupojn. Ili gapis al li silente.

— Bonan vesperon, sinjorino Kotono! — li diris. — Saluton, Rozinjo!

— Saluton, Sam! — diris Rozinjo. — Kie vi estadis? Oni diris, ke vi mortis; sed mi atendis vin ekde la printempo. Vi ne rapidis, ĉu ne vere?

— Eble ne, — diris Sam embarasite. — Sed nun mi rapidas. Ni atakas la banditojn, kaj mi devas reiri al sinjoro Frodo. Sed mi pensis ekrigardi kaj kontroli, kiel fartas sinjorino Kotono kaj vi, Rozinjo.

— Mi fartas bone, dankon, — diris sinjorino Kotono. — Aŭ tiel estus, se ne temus pri tiuj rabaj banditoj.

— Nu, ek for! — diris Rozinjo. — Se vi prizorgis sinjoron Frodo la tutan tempon, pro kio vi lasis lin, ĝuste kiam aferoj ekŝajnis danĝeraj?

Tio embarasis Samon. Necesis semajnlonga klarigado, aŭ neniu. Li forturniĝis kaj surponeiĝis. Sed kiam li ekiris, Rozinjo subenkuris la ŝtupojn.

— Miaopinie vi aspektas bele, Sam, — ŝi diris. — Iru jam! Sed gardu vin, kaj tuj revenu post kiam vi ordigos la banditojn!

Kiam Sam revenis, li trovis la tutan vilaĝon agitita. Jam, krom multaj pli junaj knaboj, pli ol cent fortikaj hobitoj estis kuniĝintaj kun hakiloj, pezaj marteloj, longaj tranĉiloj kaj pezaj bastonoj; kelkaj havis ĉaspafarkojn. Ankoraŭ pli daŭre oni envenis el ekstervilaĝaj farmbienoj.

Iuj vilaĝanoj bruligis grandan fajron, nur por vigligi la okazaĵon, kaj ankaŭ ĉar tio estis unu el la agoj malpermesitaj de la Ĉefo. Ĝi brulis brile, dum profundiĝis la nokto. Aliaj laŭ ordonoj de Gaja starigis barierojn sur la

vojo ambaŭekstreme de la vilaĝo. Kiam la ŝirifoj atingis la pli suban, ili konsterniĝis; sed tuj kiam ili konstatis, kiel statas la afero, la plimultaj forigis siajn plumojn kaj aliĝis al la ribelo. La aliaj forŝteliĝis.

Sam trovis Frodon kaj liajn amikojn apud la fajro parolantaj al maljuna Tom Kotono, dum admira amaso da apudakvanoj ĉirkaŭstaris kaj gapis.

— Nu, kio estas la venonta manovro? — demandis terkulturisto Kotono.

— Mi ne scias, — diris Frodo, — ĝis ni konos pli. Kiomas tiuj banditoj entute?

— Tio estas malfacile kalkulebla, — diris Kotono. — Ili ĉirkaŭmoviĝas kaj venas kaj iras. Kelkfoje kvindeko el ili troviĝas en iliaj kabanoj en Hobiturba direkto; sed ili eliras de tie ĉirkaŭvagante, por rabi aŭ "kolekti", kiel ili nomas tion. Tamen malofte troviĝas malpli ol dudeko ĉe la Ĉefo, kiel oni epitetas lin. Li estas en Bag-Endo, aŭ estis; sed li jam ne forlasas la terenon. Dum unu-du semajnoj, efektive, vidis lin neniu, sed liaj uloj ne permesas al iu ajn proksimiĝi.

— Hobiturbo ne estas ilia sola teritorio, ĉu? — diris Grinĉjo.

— Ne, tre bedaŭrinde, — diris Kotono. — Troviĝas sufiĉe multaj sude en Longfundo kaj apud Sarna Transpasejo, oni diras; kaj kelkaj pli kaŝiĝas en la Arbarfino; kaj ili havas budojn en la Vojrenkonto. Kaj cetere estas la Ŝlostruoj, kiel oni nomas ilin: la malnovaj varkonservejoj en Mult-Fosejo, kiujn ili faris karceroj por tiuj, kiuj oponas ilin. Tamen mi kalkulas, ke ne estas pli ol tricento da ili sume en la Provinco, kaj eble malpli. Ni povos venki ilin, se ni ĉiuj lojalos.

— Ĉu armilojn ili posedas? — demandis Gaja.

— Vipojn, tranĉilojn kaj klabojn, sufiĉajn por ilia fibezono: nur tion ili ĝis nun vidigis, — diris Kotono. — Sed mi supozas, ke ili havos aliajn ekipaĵojn, se venos batalado. Iuj havas pafarkojn, ĉiuokaze. Ili pafis unu-du el nia gento.

— Jen vi havas, Frodo! — diris Gaja. — Mi sciis, ke ni devos batali. Nu ili komencis la mortigadon.

— Ne precize, — diris Kotono. — Almenaŭ ne la pafadon. Tjukoj komencis tion. Vidu, via paĉjo, sinjoro Peregrino, li neniam akceptis tiun Lodon, jam de la komenco li diris, ke se iu devos roli kiel ĉefo je ĉi malfrua dato, tiu estos nur la laŭrajta Superulo de l' Provinco kaj neniu parvenuo. Kaj kiam Lodo sendis siajn virojn, ili neniel efikis al li. Tjukoj estas bonŝancaj, ili posedas tiujn profundajn truojn en la Verdaj Montetoj, la Granda Smialo kaj tiel plu, kaj la banditoj ne povas atingi ilin; kaj ili ne permesis, ke la banditoj paŝu sur ilia tereno. Se ili tion faras, Tjukoj persekutas ilin. Tjukoj pafis tri el ili pro spiona vagado kaj rabado. Post tio la banditoj iĝis pli malicaj. Kaj ili tre atente vaĉas Tjuklandon. Nun neniu

povas eniri aŭ eliri tie.

— Gratulon al la Tjukoj! — kriis Grinĉjo. — Sed iu estas enironta nun. Mi ekiras al la Smialo. Ĉu iu akompanos min al Tjukboro?

Grinĉjo forrajdis kun seso da junuloj sur poneoj.

— Ni revidos vin baldaŭ! — li kriis. — Estas nur ĉirkaŭ dek kvar mejloj tra la kampoj. Mi rekondukos armeon da Tjukoj matene.

Gaja blovis kornkrion post ili, dum ili forrajdis en la profundiĝantan nokton. La ĉeestantoj hurais.

— Malgraŭ ĉio, — diris Frodo al la apuduloj, — mi deziras neniun mortigadon, eĉ ne de la banditoj, krom se tio necesos, por malhelpi, ke ili damaĝu hobitojn.

— En ordo! — diris Gaja. — Sed vizitos nin la Hobiturba bando en tuja estonteco, laŭ mia opinio. Ili venos ne nur por interparoli. Ni provos trakti ilin nete, sed ni devas esti pretaj por la plej malbona. Mi jam havas planon.

— Tre bone, — diris Frodo. — Aranĝu la aferojn vi.

Ĝuste tiam kelkaj hobitoj, kiuj estis senditaj al la direkto de Hobiturbo, revenis kure.

— Ili venas! — ili diris. — Dudeko aŭ pli. Sed du foriris okcidenten tra la kamparo.

— Al la Vojrenkonto, tre certe, — diris Kotono, — por aligi pli el la bando. Nu temas pri dek kvin mejloj ambaŭdirekte. Ne necesas zorgi pri ili ĝuste nun.

Gaja forrapidis por disdoni ordonojn. Terkulturisto Kotono senhomigis la straton, sendante ĉiujn en la domojn, krom tiuj pliaĝaj hobitoj, kiuj havis iajn armilojn. Ili ne devis longe atendi. Baldaŭ ili povis aŭdi laŭtajn voĉojn, kaj poste la batadon de pezaj piedoj. Baldaŭ tuta roto da banditoj alvenis laŭ la vojo. Ili vidis la barilon kaj ridis. Ili ne supozis, ke en tiu eta lando estas io, kio kontraŭus al dudeko da ilia speco kune.

La hobitoj malfermis la barilon kaj staris flanke.

— Dankon! — la homoj mokis. — Jam iru hejmen enlitiĝi antaŭ ol vi estos vergataj. — Poste ili plu marŝis laŭ la strato kriante: — Estingu la lumojn! Endomiĝu kaj restu tie! Aŭ ni forkondukos kvindekon el vi al la Ŝlostruoj por unu jaro. Eniru! La Ĉefo ekkoleriĝas.

Neniu atentis tiujn ordonojn; sed kiam la banditoj preterpasis, ili kviete kuniĝis kaj sekvis ilin. Kiam la homoj alvenis la fajron, tie staris terkulturisto Kotono tutsola, varmigante siajn manojn.

— Kiu estas vi, kaj kion vi faras laŭ via opinio? — demandis la banditestro.

Terkulturisto Kotono rigardis lin malhaste.

— Mi estis demandonta vin ĝuste pri tio, — li diris. — Tio ĉi ne estas

via lando, kaj vi ne estas bonvena.

— Nu, vi estas ĉiuokaze bonvena, — diris la estro. — Ni deziras vin. Prenu lin, knaboj! Lin al ŝlostruoj, kaj donu al li ion kvietigan!

La homoj faris unu paŝon antaŭen kaj abrupte haltis. Leviĝis ĉie ĉirkaŭe voĉbruego, kaj subite ili konstatis, ke terkulturisto Kotono ne estas tutsola. Ili estis ĉirkaŭringitaj. En la malhelo rande de la fajrolumo staris ringo da hobitoj venintaj ŝtele el la ombroj. Ĉeestis preskaŭ ducento da ili, ĉiuj tenis ian armilon.

Gaja paŝis antaŭen.

— Ni renkontiĝis pli frue, — li diris al la estro, — kaj mi avertis, ke vi ne revenu ĉi tien. Mi denove avertas vin: vi staras en lumo kaj celas al vi pafarkistoj. Se vi tuŝos per unu fingro tiun terkulturiston, aŭ iun ajn alian, vi estos tuj pafita. Surterigu viajn eventualajn armilojn!

La estro ĉirkaŭrigardis. Li estis enanguligita. Sed li ne estis timigita, nun kun dudeko da kamaradoj por subteni lin. Li tro malmulte konis hobitojn por kompreni sian endanĝeriĝon. Malsaĝe li decidis batali, ĉar li kredis facile trarompi.

— Kontraŭ ilin, knaboj! — li kriis. — Regalu ilin!

Kun longa tranĉilo en la maldekstra mano kaj klabo en la alia, li alkuregis la ringon, provante trarompi retro al Hobiturbo. Li celis sovaĝan baton al Gaja, kiu staris sur lia vojo. Li falis mortinta kun kvar sagoj en si.

Tio sufiĉis al la aliaj. Ili kapitulacis. Iliaj armiloj estis forprenitaj, kaj ili estis ŝnure kunligitaj, kaj devigitaj marŝi ĝis dezerta kabano, kiun ili mem konstruis, kaj tie oni ligis ilin mane kaj piede, kaj enŝlosis ilin gardate. La mortan estron oni fortrenis kaj enterigis.

— ŝajnas preskaŭ tro facile, finfine, ĉu ne? — diris Kotono. — Mi ja diris, ke ni povos venki ilin. Sed ni bezonis instigon. Vi revenis ĝustatempe, sinjoro Gaja.

— Restas ankoraŭ farotaĵo, — diris Gaja. — Se vi pravas pri via kalkulado, ni ankoraŭ ne pritraktis dekonon el ili. Sed jam estas mallume. Mi opinias, ke la venonta manovro devas atendi ĝis la mateno. Tiam ni devos viziti la Ĉefon.

— Kial ne nun? — demandis Sam. — Estas apenaŭ pli malfrue ol la sesa horo. Kaj mi deziras vidi mian Avulon. Ĉu vi scias, kio okazis al li, sinjoro Kotono?

— Li fartas nek bone nek malbone, Sam, — diris la terkulturisto. — Ili elfosis Bagŝutan Vicon, kaj tio malĝojige frapis lin. Li loĝas en unu el tiuj novaj domoj, kiujn la uloj de la Ĉefo konstruis, dum ili ankoraŭ faris aliajn laborojn ol bruligado kaj rabado: ne pli ol unu mejlon post Apudakvo. Sed li vizitas min, kiam okazo prezentiĝas, kaj mi certigas, ke li estas pli bone

nutrita ol kelkaj el la povruloj. Tio kontraŭas La Regulojn, kompreneble. Mi loĝigus lin ĉe mi, sed tio estas malpermesita.

— Dankon, vere, sinjoro Kotono, kaj tion mi neniam forgesos, — diris Sam. — Sed mi volas vidi lin. Tiu Ĉefo kaj tiu Ŝarko, pri kiu ili parolis, ili eble faros misaĵojn tie antaŭ la mateno.

— En ordo, Sam, — diris Kotono. — Elektu kelkajn knabojn, kaj iru konduki lin al mia domo. Ne necesos, ke vi proksimiĝu al la malnova vilaĝo Hobiturbo trans Akvon. Jen mia Ĝoja montros al vi.

Sam foriris. Gaja aranĝis vaĉantojn ĉirkaŭ la vilaĝo kaj gardistojn ĉe la barieroj dum la nokto. Poste li kaj Frodo foriris kun terkulturisto Kotono. Ili sidis kun la familio en la varma kuirejo, kaj la Kotonoj starigis kelkajn ĝentilajn demandojn pri iliaj vojaĝoj, sed malmulte atendis la respondojn: ilin tro koncernis la okazaĵoj en la Provinco.

— Ĉio komenciĝis de Pustulo, kiel ni nomas lin, — diris terkulturisto Kotono, — kaj ĝi komenciĝis tuj post via foriro, sinjoro Frodo. Li havis strangajn ideojn, tiu Pustulo. Ŝajnis, ke li volas mem posedi ĉion, kaj poste ordonadi al aliaj personoj. Baldaŭ evidentiĝis, ke li jam efektive posedas pli ol konvenas al li; kaj li senĉese kroĉiĝis al pli, kvankam la fonto de la mono estis mistero: muelejoj kaj maltejoj, kaj hoteloj, kaj farmbienoj, kaj foliplantejoj. Li jam aĉetis la muelejon de Sablomano antaŭ ol veni al Bag-Endo, verŝajne.

» Kompreneble li komencis per multe da propraĵo, kiun li heredis de sia paĉjo; kaj ŝajnas, ke li vendadis multon el la plej bonaj folioj, kaj forsendis ĝin diskrete dum unu-du jaroj. Sed fine de la pasinta jaro li komencis forsendi amasojn da varoj, ne nur da folioj. Varoj komencis malabundi, kaj cetere vintro proksimiĝis. Oni komencis koleriĝi, sed sian respondon li havis. Multe da homoj, plejparte banditoj, venis kun grandaj furgonoj, iuj por forporti la varojn suden kaj aliaj por resti. Kaj venis pliaj. Kaj antaŭ ol ni konsciiĝis, ili estis plantitaj jen kaj jen tra la tuta Provinco, kaj faligis arbojn kaj fosis kaj konstruis al si budojn kaj domojn laŭplaĉe. Komence la varojn kaj damaĝojn pagis Pustulo; sed baldaŭ ili komencis estrumi kaj rabi ĉion, kion ili volis.

» Tiam okazis iom da perturbiĝo, sed ne sufiĉe da. Maljuna Vilĉjo, la Urbestro, ekiris al Bag-Endo por protesti, sed li neniam venis tien. Banditoj kaptis lin kaj enŝlosis lin en truo en Mult-Fosejo, kaj tie li nun estas. Kaj post tio, kio estis certe iom post la Novjaro, ne plu ekzistis Urbestro, kaj Pustulo nomis sin Ĉefŝirifo, aŭ nur ĉefo, kaj agis laŭplaĉe; kaj se iu fariĝis “impertinenta”, kiel ili nomis tion, ili sekvis Vilĉjon. Do la aferoj daŭre plimalboniĝis. Ne plu restis fumado, krom por la homoj; kaj la Ĉefo ne aprobis bieron, krom por siaj homoj, kaj fermis la trinkejojn; kaj ĉio krom

Reguloj iĝis pli kaj pli malabunda, krom se oni sukcesis kaŝi iomete de sia propraĵo, kiam la banditoj ĉirkaŭiris prenante la aĵojn “por justa distribuado”: tio signifis, ke ili havas ĝin kaj ni ne, escepte de la postrestaĵoj, kiujn oni povis ricevi ĉe la ŝirifejoj, se eblis toleri ilin. Ĉio tre malbona. Sed post kiam venis Ŝarko, regis plena ruiniĝo.

— Kiu estas tiu Ŝarko? — diris Gaja. — Mi aŭdis unu el la banditoj mencii lin.

— La plej granda bandito el ĉiuj, verŝajne, — respondis Kotono. — Estis ĉirkaŭ la lasta rikolto, eble fine de septembro, kiam ni la unuan fojon aŭdis pri li. Ni neniam vidis lin, sed li estas supre ĉe Bag-Endo; kaj nun li estas la reala Ĉefo, mi supozas. Ĉiuj banditoj faras laŭ liaj ordonoj; kaj tion, kion li ordonas, estas plejparte: hako, bruligo kaj ruinigo; kaj jam fariĝis mortigo. Eĉ ne plu estas jam en tio ia misa senco. Ili detranĉas arbojn kaj lasas ilin kuŝantaj, ili bruligas domojn kaj ne konstruas novajn.

» Ekzemple, la muelejo de Sablomano. Pustulo detruis ĝin preskaŭ tuj post kiam li venis al Bag-Endo. Poste li enkondukis bandon da malpuraspektaj homoj por konstrui pli grandan kaj plenigi ĝin je radoj kaj strangaj aparatoj. Tio plaĉis nur al tiu stultulo Ted, kaj li laboras tie purigante radojn por la homoj, kie lia paĉjo estis la muelisto kaj propra mastro. La ideo de Pustulo estis mueli pli multon pli rapide, aŭ tion li diris. Li havas aliajn similajn muelejojn. Sed necesas havi muelotaĵon antaŭ ol povi mueli; kaj nenio plia ekzistis por la nova muelejo ol por la malnova. Sed post kiam venis Ŝarko, oni tute ne plu muelas grenon. Ili konstante marteladas kaj eligadas fumon kaj fetoron, kaj eĉ nokte ne estas trankvilo en Hobiturbo. Kaj ili elverŝas fiaĵon intence; ili malpurigis la tutan malsupran Akvon, kaj tio ekfluas en Brandovinon. Se ili volas dezertigi la Provincon, ili ekagas laŭ ĝusta maniero. Mi ne kredas, ke tiu stulta Pustulo respondecas pri ĉio ĉi. Kulpas Ŝarko, laŭ mia opinio.

— Vi pravas! — intermetis juna Tom. — Vidu, ili eĉ kaptis la maljunan panjon de Pustulo, tiun Lobelia, kaj li tre amis ŝin eĉ se neniu alia same. Kelkaj el la hobiturbanoj vidis tion. Ŝi venis laŭ la vojeto kun sia malnova ombrelo. Iuj banditoj iris laŭ la mala direkto kun granda furgono.

»— Kien vi iras? — ŝi diras.

»— Al Bag-Endo, — ili respondas.

»— Por kio? — ŝi diras.

»— Por konstrui kabanojn por Ŝarko, — ili respondas.

»— Laŭ kiu vi rajtas? — ŝi diras.

»— Laŭ Ŝarko, — ili diras. — Do liberigu la vojon, maljuna megeraĉo!

»— Mi havigos al vi Ŝarkon, vi fiaj rabaj banditoj! — ŝi diras kaj levas sian ombrelon kaj atakas la estron, preskaŭ duoble pli altan ol ŝi. Do ili

kaptis ŝin. Fortrenis ŝin al Ŝlostruoj, je ŝia aĝo cetere. Ili kaptis ankaŭ aliajn, kiuj pli mankas al ni, sed ne eblas kontraŭdiri, ke ŝi montris pli da spirito ol la plejmulto.

En la mezo de tiu ĉi interparolado venis Sam, enŝoviĝanta kun sia Avulo. Maljuna Vato ne aspektis multe pli aĝa, sed li estis iomete pli surda.

— Bonan vesperon, sinjoro Baginzo! — li diris. — Mi ĝojas revidi vin nedamaĝita. Sed mi devas kritiki vin, por tiel diri, se mi rajtas tion aŭdaci. Vi tute ne devis vendi Bag-Endon, kiel mi ĉiam diris. Tio ekirigis la tutan misaĵon. Kaj dum vi turismis en fremdujo, persekutante Nigrulojn sur montojn, laŭ tio, kion rakontas mia Sam, kvankam li ne klarigas kiucele, ili ekagis kaj trafosis Bagŝutan Vicon kaj ruinigis miajn terpomojn!

— Mi tre bedaŭras, sinjoro Vato, — diris Frodo. — Sed nun reveninte mi faros mian plejeblon kompensi tion.

— Nu, oni ne povas diri pli juste, — diris la Avulo. — Sinjoro *Frodo* Baginzo estas vera ĝentilhobito, mi ĉiam diris, kion ajn oni opinias pri kelkaj aliuloj samnomaj, pardonpete. Kaj mi esperas, ke mia Sam kondutis bone kaj servis kontentige, ĉu?

— Perfekte kontentige, sinjoro Vato, — diris Frodo. — Fakte, se vi volas tion kredi, li estas nun unu el la plej famaj personoj en ĉiuj landoj, kaj oni verkas kantojn pri liaj faroj de ĉi tie ĝis la maro kaj trans la Granda Rivero.

Sam hontruĝiĝis, sed li rigardis danke al Frodo, ĉar la okuloj de Rozinjo estis brilantaj kaj ŝi ridetis al li.

— Tio estas malfacile kredebla, — diris la Avulo. — Kvankam mi vidas, ke li enmiksiĝis en stranga societo. Kio okazis al lia veŝto? Mi ne aprobas portadon de feraĵoj, ĉu aŭ ne ili rezistas triviĝon.

La domanaro de terkulturisto Kotono leviĝis frue en la posta mateno. Nenio aŭdiĝis dum la nokto, sed pliaj problemoj certe alvenos antaŭ ol la tago estos maturiĝinta.

— Ŝajnas, ke neniu el la banditoj restis en Bag-Endo, — diris Kotono, — sed la bando el Vojrenkonto aperos pli-malpli baldaŭ.

Post matenmanĝo enrajdis kuriero el la Tjuklando. Li estis ekzaltita.

— La Superulo agitis nian tutan landon, — li diris, — kaj la informoj fajrece disvastiĝas ĉiudirekte. La banditoj, kiuj vaĉis nian landon, fuĝis suden, tiuj kiuj eskapis vivantaj. La Superulo postsekvis ilin por forbari la bandegon en tiu regiono; sed li sendis reen sinjoron Peregrino kun ĉiuj ceteraj personoj, kiujn li povas malhavi.

La posta novaĵo estis malpli agrabla. Gaja, kiu la tutan nokton restis ekstere, enrajdis ĉirkaŭ la deka horo.

— Troviĝas bandego je proksimume kvarmejla distanco, — li diris.

— Ili venas laŭ la vojo el Vojrenkonto, sed sufiĉe multaj apartaj banditoj aliĝis al ili. Certe estas cento da ili; kaj ili bruligas survoje. Ili estu malbenitaj!

— Ha! Tiu bandego ne prokrastos por interparoli, ili mortigos laŭeble, — diris terkulturisto Kotono. — Se Tjukoj ne venos pli frue, ni prefere ŝirmu nin kaj pafadu sendebate. Nepras iom da batalado antaŭ ol tio ĉi finiĝos, sinjoro Frodo.

La Tjukoj efektive venis pli frue. Postnelonge ili enmarŝis centope el Tjukboro kaj la Verdaj Montetoj, kun Grinĉjo ĉekape. Gaja jam havis sufiĉan hobitaron por pritrakti la banditojn. Skoltoj raportis, ke tiuj dense kuniĝas. Ili sciis, ke la regiono ribelis, kaj klare intencis senkompate pritrakti la ribelon ĉe ties centro en Apudakvo. Sed kiel ajn ili estis minacaj, ŝajnis ke ili havas neniun estron, kiu komprenas la militon. Ili iris sen antaŭzorgoj. Gaja rapide pretigis siajn planojn.

La banditoj alvenis trampe laŭ la ĉefvojo, kaj ne haltinte turniĝis sur la Apudakvan Vojon, kiu dum parto de la vojo deklivis supren inter altaj montetoj kun malaltaj heĝoj supre. Ĉirkaŭ vojkurbiĝo, proksimume mejlokonon de la ĉefvojo, ili renkontis fortikan baron el renversitaj malnovaj farmfurgonoj. Tio haltigis ilin. Sammomente ili konsciiĝis, ke la ambaŭflankaj heĝoj, ĝuste super iliaj kapoj, kaŝis vicojn da hobitoj. Malantaŭe aliaj hobitoj nun elpuŝis kelkajn pliajn furgonojn, kiuj estis kaŝitaj en kampo, kaj tiel baris la retrovojon. Voĉo alparolis ilin de supre.

— Nu, vi marŝis en kaptilon, — diris Gaja. — Viaj kunuloj el Hobiturbo faris same, kaj unu estas mortinta kaj la ceteraj estas kaptitoj. Demetu viajn armilojn! Poste reiru dudek paŝojn kaj sidiĝu. Iuj provantaj elrompiĝi estos pafitaj.

Sed la banditoj jam ne estis tiel facile timigeblaj. Kelkaj el ili obeis, sed estis tuj atakitaj de siaj kunuloj. Dudeko aŭ pli retroiris kaj atakis la furgonojn. Ses el ili estis pafitaj, sed la ceteraj elrompiĝis, mortiginte du hobitojn, kaj poste diskuris trakampare direkte al la Arbarfino. Ankoraŭ du falis dumkure. Gaja blovis laŭtan kornvokon, kaj aŭdiĝis respondaj vokoj el fore.

— Ili ne eskapos, — diris Grinĉjo. — La tuta tereno svarmas je niaj ĉasantoj.

Malantaŭe, la embuskitoj en la vojeto, ankoraŭ ĉirkaŭ okdeko, provis grimpi la barieron kaj la montetojn, kaj la hobitoj estis devigitaj pafi multajn el ili aŭ ataki ilin hakile. Sed multaj el la pli fortaj kaj pli furiozaj eliĝis je la okcidenta flanko, kaj atakis mortigeme siajn malamikojn, ĉar ili jam pli celis mortigi ol eskapi. Pluraj hobitoj falis, kaj la ceteraj ekhezitis, kiam Gaja kaj Grinĉjo, kiuj troviĝis orientflanke, transiris kaj sturmis la banditojn. Gaja mem mortigis la estron, grandan straban banditon similan al grandega orko. Poste li retroirigis siajn soldatojn, ĉirkaŭante la lastan restaĵon de la homoj per larĝa ringo da pafarkistoj.

Post kelka tempo ĉio finiĝis. Preskaŭ sepdeko da banditoj kuŝis mortintaj sur la batalkampo, kaj dekduo estis kaptitaj. Dek naŭ hobitoj estis mortigitaj, kaj ĉirkaŭ tridek estis vunditaj. La mortintaj banditoj estis ŝarĝitaj sur ĉarojn kaj fortrenitaj al malnova sablejo en proksimo kaj tie entombigitaj: en la Bataltruo, kiel oni poste nomis ĝin. La falintaj hobitoj estis kune kuŝigitaj en tombo sur la montoflanko, kie poste estis starigita monumento kun ĝardeneto ĉirkaŭe. Tiel finiĝis la Batalo ĉe Apudakvo, 1419, la lasta batalo okazinta en la Provinco, kaj la sola batalo depost la Verdaj Kampoj, 1147, fore en Nord-kvarono. Sekve, kvankam feliĉe ĝi kostis nur tre malmultajn vivojn, ĝi havas propran ĉapitron en la Ruĝa Libro, kaj la nomoj de ĉiuj partoprenintoj estis listigitaj kaj parkeritaj de la Provincaj historiistoj. La tre konsiderinda plibonigo de la renomo kaj fortuno de la familio Kotono datiĝas de tiu tempo; sed ĉe la supro de la Listo en ĉiuj versioj staras la nomoj de komandantoj Gajadoko kaj Peregrino.

Frodo partoprenis la batalon, sed li ne elingigis glavon, kaj lia ĉefa rolo estis malhelpi, ke la hobitoj, koleraj pro la perditoj, mortigu tiujn malamikojn, kiuj forĵetis siajn armilojn. Kiam la luktado ĉesis, kaj la postaj taskoj estis ordonitaj, Gaja, Grinĉjo kaj Sam aliĝis al li, kaj ili retrorajdis kun la Kotonoj. Ili manĝis malfruan tagmanĝon, kaj poste Frodo diris kun suspiro:

— Nu, supozeble jam estas tempo, ke ni pritraktu la “ĉefon”.

— Jes ja, ju pli frue, des pli bone, — diris Gaja. — Kaj ne estu tro milda! Li respondecas pri enkonduko de tiuj banditoj, kaj pri la tuta misaĵo farita de ili.

Terkulturisto Kotono kunigis eskorton el ĉirkaŭ dudek kvar fortikaj hobitoj.

— Ĉar ni nur konjektas, ke ne restas plu banditoj ĉe Bag-Endo, — li diris. — Ni ne scias. — Poste ili ekiris marŝe. Frodo, Sam, Gaja kaj Grinĉjo iris la unuaj.

Ĝi estis unu el la horoj plej malĝojaj de iliaj vivoj. La granda tubo leviĝis antaŭ ili; kaj kiam ili proksimiĝis al la malnova vilaĝo trans la Akvo, tra vicoj da novaj domaĉoj ambaŭflanke de la vojo, ili vidis la novan muelejon en ĝia tuta grimaca kaj malpura malbeleco: granda brika konstruaĵo transarkanta la fluon, kiun ĝi malpurigis per vapora kaj fetora elverŝo. Laŭ la tuta longo de la Apudakva Vojo ĉiu arbo estis faligita.

Transirante la ponton kaj suprenrigardante ili anhelis. Eĉ tiu vizio, kiun Sam vidis en la spegulo, ne pretigis lin por tio, kion ili vidis. La Malnova Biendomo okcidente estis faligita, kaj ĝian spacon okupis vicoj da gudritaj budoj. Ĉiuj kaŝtanarboj estis for. La teramasetoj kaj veprejoj estis rompitaj. Grandaj furgonoj staris malorde sur kampo paŝnudigite senherba. Bagŝuta Vico estis osceda sabla kaj skoria fosejo. Bag-Endo supre estis nevidebla pro malordo da domacoj.

— Oni detranĉis ĝin! — kriis Sam. — Oni detranĉis la festan Arbon! Li indikis la lokon, kie antaŭe staris la arbo, sub kiu Bilbo diris sian Adiaŭan Paroladon. Ĝi kuŝis prihakita kaj mortinta sur la kampo. Kvazaŭ tio estus la fina bato, Sam ekploris.

Rido silentigis ilin. Malafabla hobito apogaĉis sin al malalta muro de la mueleja korto. Tiu estis malpurvizaĝa kaj nigramana.

— Ĉu ne plaĉas al vi, Sam? — li rikanis. — Nu, vi ĉiam estis malfortika. Mi pensis, ke vi foriris en iu el tiuj ŝipoj. Pri kiuj vi iam babilis: velante, velante. Pro kio vi volas reveni? Laboro estas farenda nuntempe en la Provinco.

— Tion mi vidas, — diris Sam. — Mankas tempo por sinlavado, sed estas tempo por murapogado. Sed vidu, sinjoro Sablomano, mi havas ŝuldon pagotan en tiu ĉi vilaĝo, kaj vi ne aldonu al ĝi per via rikanado, aŭ vi pagos konton tro pezan por via monujo.

Ted Sablomano kraĉis trans la muron.

— Fu! — li diris. — Min vi ne povas tuŝi. Mi estas amiko de la Estro. Sed li tuŝos vin efektive, se min plu ĝenos via buŝaĉo.

— Ne malŝparu pliajn vortojn pro la stultulo, Sam! — diris Frodo. — Mi esperas, ke ne troviĝas multe pli da hobitoj, kiuj iĝis tiaj. Tio estus ĝeno pli granda, ol la tuta damaĝo farita de la homoj.

— Vi estas malpura kaj insolenta, Sablomano, — diris Gaja. — Kaj vi tre miskalkulas. Ni iras ĝuste supren por forigi vian valoran Estron. Ni jam pritraktis liajn homojn.

Ted gapis, ĉar tiumomente li ekvidis la eskorton, kiu pro signo de Gaja nun tramarŝis la ponton. Rekurinte en la muelejon, li elkuris kun korno kaj laŭte sonorigis ĝin.

— Ŝparu vian spiron! — ridis Gaja. — Pli bonan mi havas. — Poste li

levis sian arĝentan kornon kaj blovis ĝin, kaj ĝia klara voko sonoris sur la Monto; kaj el la truoj kaj kabanoj kaj malbelaj domoj de Hobiturbo la hobitoj respondis kaj elverŝiĝis, kaj kun huraoj kaj laŭtaj krioj ili sekvis la trupon supren survoje al Bag-Endo.

Supre de la vojo la trupo haltis, kaj Frodo kaj liaj amikoj pluiris; kaj ili alvenis fine al la loko antaŭe amita. La ĝardenon plenigis budoj kaj kabanoj, iuj tiel proksimaj al la malnovaj okcidentaj fenestroj, ke ili forbaris ties tutan lumon. Ĉie estis staploj da rubaĵo. La pordo estis cikatrita; la sonorila ĉeno pendis neligita, kaj la sonorilo rifuzis sonori. Frapado aligis neniun respondon. Fine ili puŝis, kaj la pordo cedis.

Ili eniris. La loko malbonodoris kaj estis plena de malpuraĵo kaj malordo: laŭŝajne ĝi jam delonge estis neuzita.

— Kie sin kaŝas tiu mizera Lodo? — diris Gaja, kiam ili jam traserĉis ĉiujn ĉambrojn kaj trovis nenion vivantan krom ratoj kaj musoj. — Ĉu ni funkciigu la aliajn por traserĉi la kabanojn?

— Tio ĉi estas pli malbona ol Mordoro! — diris Sam. — Iasence multe pli malbona. Ĝi hejmenigas la impresojn, kiel oni diras; ĉar hejmo ĝi estas, kaj oni memoras ĝin antaŭ ol ĝi estis ruinigita.

— Jes, tio estas Mordoro, — diris Frodo. — Nur unu el ĝiaj verkoj. Sarumano faris ĝian laboron la tutan tempon, eĉ kiam li supozis labori por si. Kaj same pri tiuj, kiujn Sarumano trompis, ekzemple Lodo.

Gaja ĉirkaŭrigardis malesperiĝe kaj abomene.

— Ni foriru! — li diris. — Se mi konus la tutan misaĵon kaŭzitan de li, mi ja ŝovus mian pakaĵon tra la gorĝo de Sarumano.

— Sendube, sendube! Sed tion vi ne faris, kaj sekve mi povas bonvenigi vin en via hejmo.

Tie staranta en la pordo estis Sarumano mem, aspektanta bone nutrita kaj tre kontenta; liaj okuloj ekbrilis je malico kaj amuziĝo. Subite eklumiĝis la menso de Frodo.

— Ŝarko! — li kriis. Sarumano ridis.

— Do vi aŭdis mian nomon, ĉu? Mia tuta popolo antaŭe nomis min tiel en Isengardo, mi opinias. Indiko pri amo, eble[13]. Sed evidente vi ne atendis vidi min ĉi tie.

— Ja ne, — diris Frodo. — Sed mi devis diveni. Iom da malico mismaniere: Gandalfo avertis min, ke vi ankoraŭ kapablas tion.

— Tute kapablas, — diris Sarumano, — kaj pli ol nur iom. Vi ridigis min, vi, hobitaj moŝtetoj, rajdantaj kun tiuj multaj granduloj, tiel sekuraj kaj etule memplaĉaj. Vi supozis, ke vi bone profitis el la tuto, kaj povis jam nur reambli kaj ĝui belan trankvilon en la kamparo. La hejmo de Sarumano povis tute detruiĝi, kaj li povis esti eligita, sed neniu povis tuŝi la vian. Ho

ne! Gandalfo prizorgus viajn aferojn.

Sarumano ridis denove.

— Li ne! Kiam liaj iloj finas sian taskon, li forĵetas ilin. Sed vi permesis al vi pendoladi post li, prokrastante kaj babilante, kaj ĉirkaŭrajdante duoble tiom, kiom necesis. “Nu, — mi pensis, — se ili estas tiaj stultuloj, mi antaŭiros ilin kaj instruos al ili belan lecionon. Malbonfaro meritas reciprokon”. La leciono estus pli akra, se nur vi havigus al mi pli da tempo kaj pli da homoj. Tamen mi jam faris multon, kion vi nur malfacile riparos aŭ renversos dum la vivtempo. Kaj estos agrable pensi pri tio kaj tiel kontraŭpezi miajn damaĝojn.

— Nu, se tion vi trovas agrabla, — diris Frodo, — mi kompatas vin. Tio estos plezuro nur memora, timinde. Iru tuj kaj neniam revenu!

La vilaĝaj hobitoj jam vidis Sarumanon elveni el unu el la kabanoj, kaj ili amasiĝis antaŭ la pordo de Bag-Endo. Aŭdinte la ordonon de Frodo, ili murmuris kolere:

— Ne lasu, ke li foriru! Mortigu lin! Li estas bandito kaj murdinto. Mortigu lin!

Sarumano ĉirkaŭrigardis al iliaj malamikaj vizaĝoj kaj ridetis.

— “Mortigu lin!” — li mokis. — Mortigu lin, se vi kredas vin sufiĉe multaj, miaj bravaj hobitoj! — Li rektigis sin kaj fikse rigardis ilin sombre per siaj nigraj okuloj. — Sed ne supozu, ke perdinte miajn posedaĵojn mi samtempe perdis mian tutan potencon! Kiu frapos min, tiu estos malbenita. Kaj se mia sango makulos la Provincon, tiu velkos kaj neniam plu estos resanigita.

La hobitoj retiriĝis. Sed Frodo diris:

— Ne kredu lin! Li perdis sian tutan potencon, krom la voĉo ankoraŭ kapabla timigi kaj trompi vin, se vi tion permesas. Sed mi malpermesas, ke li estu mortigita. Senutilas per venĝo rebati venĝon: tio rebonigas nenion. Iru, Sarumano, laŭ la vojo plej rapida!

— Vermo! Vermo! — Sarumano vokis; kaj el la proksima kabano venis Vermlango, rampante, preskaŭ hundece. — Al la vojo denove, Vermo! Ĉi tiuj bravuloj kaj moŝtetoj denove drivigas nin. Venu jam!

Sarumano turnis sin por foriri, kaj Vermlango treniĝis post li. Sed ĝuste, kiam Sarumano pasis apud Frodo, en lia mano ekbrilis ponardo, kaj li batis rapide. La klingo frapiĝis kontraŭ la kaŝita kiraso kaj rompiĝis. Dekduo da hobitoj kun Sam la unua saltis antaŭen kriante kaj ĵetis la banditon al la tero. Sam elingigis sian glavon.

— Ne, Sam! — diris Frodo. — Ne mortigu lin eĉ nun. Ĉar li ne malutilis al mi. Kaj ĉiuokaze mi ne volas lin mortigita en tia mishumoro. Iam li estis grandioza, el nobla speco, kontraŭ kiu ni ne aŭdacus levi la

manon. Li estas falinta, kaj kuraci lin estas ekster nia povo; sed mi volas plu indulgi lin, esperante, ke kuracon li ie trovos.

Sarumano stariĝis kaj fikse rigardis Frodon. En liaj okuloj estis stranga esprimo de miksitaj miro, respekto kaj malamo.

— Vi maturiĝis, duonulo, — li diris. — Jes, vi profunde maturiĝis. Vi estas saĝa kaj kruela. Vi forrabis el mia venĝo ties dolĉon, kaj nun mi devas foriri amare, kaj en ŝuldo al via indulgo. Mi tion malamas, kaj mi vin malamas! Nu, mi iras kaj mi ne plu ĝenos vin. Sed ne atendu, ke mi deziru al vi sanon kaj longan vivon. Vi havos neniun el ambaŭ. Sed tio ne estos mia faro. Mi nur aŭguras.

Li formarŝis, kaj la hobitoj liberigis vojon, ke li trapasu; sed iliaj fingrostoj blankiĝis, dum ili premis siajn armilojn. Vermlango hezitis kaj poste sekvis sian mastron.

— Vermlango! — vokis Frodo. — Ne necesas sekvi lin. Mi scias pri neniu misfaro de vi kontraŭ min. Vi povos ricevi ĉi tie ripozon kaj manĝaĵon dum kelka tempo, ĝis vi refortiĝos kaj povos laŭiri vian vojon.

Vermlango haltis kaj rerigardis al li, duone preta resti. Sarumano turniĝis.

— Ĉu neniu misfaro? — li gakis. — Ho ne! Eĉ kiam li elŝteliris nokte, tio estis nur por rigardi la stelojn. Sed ĉu mi aŭdis iun demandi, kie sin kaŝas povra Lodo? Vi scias tion, ĉu ne, Vermo? Ĉu vi volas diri al ili?

— Ne, ne! — Vermlango plordiris kaŭrante.

— Do mi diros, — diris Sarumano. — Vermo mortigis vian Ĉefon, la kompatindulon, vian agrablan Estreton, ĉu ne, Vermo? Trapikis lin dormantan, mi opinias. Enterigis lin, mi esperas; kvankam Vermo lastatempe tre malsatis. Ne, Vermo ne estas vere ŝatinda. Prefere lasu lin al mi.

Esprimo de sovaĝa malamego aperis en la ruĝaj okuloj de Vermlango.

— Vi ordonis tion al mi; vi devigis min fari tion, — li siblis. Sarumano ridis.

— Vi faras laŭ la ordonoj de Ŝarko, ĉiam, ĉu ne, Vermo? Nu, nun li ordonas: sekvu!

Li piedbatis la vizaĝon de la kaŭranta Vermlango, turnis sin kaj ekiris. Sed tiumomente io rompiĝis: subite Vermlango stariĝis, eligante kaŝitan ponardon, poste kun hundeca graŭlo li saltis sur la dorson de Sarumano, tiris malantaŭen ties kapon, tranĉis lian gorĝon, kaj kun krio forkuris laŭ la vojeto. Antaŭ ol Frodo povis konsciiĝi aŭ paroli eĉ unu vorton, tri hobitaj pafarkoj kordsonoris kaj Vermlango falis mortinta.

Konsternante la apudstarantojn, ĉirkaŭ la kadavro de Sarumano kolektiĝis griza nebuleto, kaj leviĝinte malrapide al altego kiel fumo de

fajro, kiel pala tukvolvita figuro, ĝi superombris la Monteton. Momente ĝi ŝanceliĝis, rigardante okcidenten; sed el la okcidento blovis malvarma vento, kaj ĝi forkliniĝis, kaj suspirante solviĝe neniiĝis.

Frodo rigardis al la kadavro kun kompato kaj hororo, ĉar dum li rigardis ŝajnis, ke longaj mortojaroj estas subite rivelitaj en ĝi, kaj ĝi ŝrumpis, kaj la ŝrumpinta vizaĝo iĝis haŭtĉifonoj sur la hida kranio. Levinte la randon de la malpura mantelo apudsternita, li ĝin kovris kaj forturnis sin.

— Kaj jen la fino de tio, — diris Sam. — Fino malbela, kaj mi preferus ne vidi ĝin; sed ĝi estas brava liberiĝo.

— Kaj la fina fino de la Milito, espereble, — diris Gaja.

— Tion mi esperas, — diris Frodo kaj suspiris. — Kaj laste lasta bato. Sed pripensu, ke ĝi okazis ĉi tie, ĉe la pordo mem de Bag-Endo! Inter ĉiuj miaj esperoj kaj timoj, mi almenaŭ neniam atendis tion.

— Mi ne nomos ĝin fino, ĝis ni estos ordigintaj la fatrason, — malĝoje diris Sam. — Kaj tio postulos multe da tempo kaj da laboro.

9

La Grizaj Havenoj

La ordigado efektive postulis multe da laboro, sed ĝi okupis malpli da tempo ol Sam antaŭtimis. La tagon post la batalo Frodo rajdis ĝis Mult-Fosejo kaj liberigis la karcerulojn el la ŝlostruoj. Unu el la unuaj trovitoj estis kompatinda Fredegaro Bolĝero, jam ne Dikulo. Li estis kaptita, kiam la kanajlaro elpelis trupon da ribelintoj, kiun li kondukis el kaŝlokoj supre en Brokenboro apud la montetoj Skario.

— Finfine pli profitus al vi akompani nin, povra oldulo Fredegaro! — diris Grinĉjo, dum ili elportis lin tro malfortan por marŝi.

Li malfermis unu okulon kaj brave klopodis rideti.

— Kiu estas tiu juna giganto kun laŭta voĉo? — li flustris. — ĉu eta Grinĉjo? Kiom mezuras nun viaj ĉapeloj?

Ĉeestis ankaŭ kompatinda Lobelia. Ŝi aspektis tre maljuna kaj maldika, kiam ili savis ŝin el malluma kaj mallarĝa ĉelo. Ŝi insiste lamiris proprapiede; kaj okazis tia bonvenigo, tiom da manfrapado kaj huraoj, kiam ŝi aperis, apogante sin al la brako de Frodo, sed ankoraŭ kroĉante sian ombrelon, ke ŝi estis vere emociita, kaj ŝi forveturis larmante. Ŝi neniam antaŭe en la vivo estis populara. Sed ŝin premegis la novaĵo pri la murdo de Lodo, kaj ŝi rifuzis reiri al Bag-Endo. Ŝi redonis ĝin al Frodo kaj iris al sia propra popolo, al Bresgirdeloj en Durbotelo.

Kiam la kompatindulino mortis en la posta printempo — ja ŝi estis pli ol centjara — Frodo estis surprizita kaj multe emociita: ŝi testamentis al li la tutan restaĵon de sia mono kaj la mono de Lodo, por ke li utiligu ĝin helpante hobitojn senhejmigitajn de la perturboj. Tiel finiĝis tiu malpaco.

Maljuna Vilĉjo Blankpiedo estis en la Ŝlostruoj pli longe ol la aliaj, kaj kvankam li eble estis traktita malpli severe ol kelkaj, li bezonis multe da nutrado antaŭ ol li povis roli urbestre laŭ la aspekto; do Frodo konsentis posteni kiel lia anstataŭanto, ĝis sinjoro Blankpiedo denove bonfartiĝos. Lia sola plenumo kiel vicurbestro estis limigi la ŝirifojn al ties ĝustaj funkcioj kaj nombro. La taskon de persekutado de la banditoj oni lasis al Gaja kaj Grinĉjo, kaj tio baldaŭ kompletiĝis. La sudlandaj banditoj, aŭdinte novaĵon pri la Apudakva Batalo, fuĝis el la Provinco kaj malmulte oponis la Superulon. Antaŭ la jarfino la malmultaj postvivintoj estis ĉirkaŭzonitaj en la arbaroj, kaj oni kondukis kapitulacintojn al la landlimo.

Intertempe la riparlaboro daŭris rapide, kaj Sam estis ege okupata.

Hobitoj kapablas labori abelece, kiam ilin trafas taŭgaj humoro kaj neceso. Nun troviĝis miloj da laboremaj manoj ĉiuaĝaj, ekde la etaj sed viglaj de hobitaj geknaboj ĝis la multuzitaj kaj kalaj de la geavoj. Antaŭ la Julo[14] ne plu restis eĉ briko de la novaj ŝirifejoj aŭ de io ajn konstruita de la "homoj de Ŝarko"; sed la brikoj estis uzitaj por ripari multajn malnovajn truojn, por igi tiujn pli komfortaj kaj pli sekaj. Estis trovitaj grandaj stokoj da varoj, manĝaĵoj kaj biero, kiujn la banditoj forkaŝis en budoj kaj fojnejoj kaj forlasitaj truoj, kaj precipe en la tuneloj ĉe Mult-Fosejo kaj en la malnovaj ŝtonminejoj de Skario; do tiun Julon ekzistis multe pli da plezuro, ol oni antaŭesperis.

Unu el la unuaj faritaĵoj en Hobiturbo, eĉ antaŭ forigo de la nova muelejo, estis renovigo de la Monteto kaj de Bagŝuta Vico. La antaŭaĵo de la nova sablejo estis tute nivelita kaj transformita al granda ŝirmita ĝardeno, kaj novaj truoj estis elfositaj en la sudfronta antaŭaĵo de la Monteto, kaj tiuj estis briktegitaj. La Avulo estis reloĝigita en Numero Tri; kaj li diris ofte kaj ne ĝenis sin pri aŭdontoj.

— Vere malofta vento profitas al neniu, kiel mi ĉiam diris. Kaj fino bona — ĉio pli bona!

Oni iom diskutis pri nomo donota al la nova vico. Oni pensis pri *Batalĝardeno*, aŭ *Pli Bonaj Smialoj*. Sed post iom da tempo laŭ sagaca hobita maniero, oni nomis ĝin simple *Nova Vico*. Estis nura Apudakva ŝerco aludi al ĝi kiel al *Ŝarka Fino*.

La arboj estis la plej severa perdo kaj damaĝo, ĉar pro ordono de Ŝarko ili estis detranĉitaj malrespondece tre vaste en la Provinco; kaj Sam funebris pro tio pli ol pro io alia. Ekzemple, tiu misfaro nur longe kuraciĝos, kaj nur liaj pragenepoj, Sam supozis, vidos la Provincon tia, kia ĝi devus esti.

Sed subite iun tagon, ĉar dum semajnoj li estis tro okupita por pripensi siajn aventurojn, li rememoris pri la donaco de Galadriela. Li elprenis la skatolon kaj montris ĝin al la ceteraj Vojaĝintoj (nun ĉiuj tiel nomis ilin), kaj petis ties konsilon.

— Mi scivolis, kiam vi rememoros pri ĝi, — diris Frodo. — Malfermu ĝin!

Interne ĝi estis plena da griza polvo, mola kaj fajna, en kies mezo estis semo, kvazaŭ eta arĝentumita nukso.

— Kion mi faru pri tio ĉi? — diris Sam.

— Ĵetu ĝin en la aeron dum venteta tago kaj lasu ĝin fari sian taskon! — diris Grinĉjo.

— Kie? — demandis Sam.

— Elektu lokon kiel provejon, kaj vidu kio okazas al la plantoj tie, — diris Gaja.

— Sed mi certas, ke la Damo ne estus kontenta, se mi tute retenus ĝin en mia propra ĝardeno, kiam tiom da personoj estas suferintaj, — diris Sam.

— Utiligu viajn tutajn sagacon kaj konojn, Sam, — diris Frodo, — kaj poste uzu la donacon por helpi kaj plibonigi vian laboron. Kaj uzu ĝin ŝpareme. Ne estas multo, kaj mi supozas, ke ĉiu grajno havas valoron.

Do Sam plantis arbidojn en ĉiuj lokoj, kie arboj aparte belaj aŭ amitaj estis detruitaj, kaj li metis grajnon de la valorega polvo ĉe ĉies radikoj. Li iris tien-reen en la Provinco dum tiu laboro; sed se li speciale atentis pri Hobiturbo kaj Apudakvo, neniu kulpigis lin. Kaj fine li konstatis, ke ankoraŭ restas al li iomete da polvo; do li iris al la Tri-kvarona Ŝtono, kiu estas la proksimuma centro de la Provinco, kaj ĵetis ĝin en la aeron kun sia beno.

La etan arĝentan nukson li plantis en la Festa Kampo, kie iam estis la arbo; kaj li scivolis, kio devenos el ĝi. Tra la tuta vintro li restis kiel eble plej pacienca, kaj li klopodis deteni sin de konstanta alirado por vidi, ĉu okazas io.

La printempo preteratingis liajn plej senraciajn esperojn. Liaj arboj komencis ŝosi kaj kreski, kvazaŭ la tempo mem urĝus kaj volus fari dum unu jaro laboron de dudek. En la Festa Kampo bela juna arbido supren impetis: ĝi havis arĝentan ŝelon kaj longajn foliojn kaj eksplodis je oraj floroj en aprilo. Ĝi ja estis *malorno*, kaj ĝi mirigis la ĉirkaŭaĵon. Dum postaj jaroj, kiam ĝi kreskis gracie kaj bele, ĝi iĝis vaste konata kaj oni plenumis longajn vojaĝojn por vidi ĝin: ĝi estis la nura *malorno* okcidente de la Montoj kaj oriente de la Maro, kaj unu el la plej superbaj en la mondo.

Entute 1420 en la Provinco estis jaro mirinda. Ne nur estiĝis belega sunlumo kaj frandinda pluvo, ĝustatempe kaj laŭ ĝusta mezuro, sed ŝajne estis io plia: etoso de riĉeco kaj kreskado, kaj ekbrilo de belo superanta tiun de mortemulaj someroj, kiuj flagras kaj rapide forpasas sur tiu ĉi Mez-Tero. Ĉiuj infanoj naskitaj aŭ generitaj dum tiu jaro, kaj ili estis multaj, estis belaj kaj fortaj, kaj la plimulto havis orajn harojn, kio estintis maloftaĵo inter la hobitoj. La fruktoj estis tiel abundaj, ke junaj hobitoj preskaŭ banis sin en fragoj kaj kremo; kaj pli poste ili sidis sur la razenoj sub prunarboj kaj manĝis, ĝis ili amasigis prunkernojn kiel piramidojn aŭ kraniojn amasigitajn de venkinto, kaj poste ili plumoviĝis. Kaj neniu malsanis, kaj ĉiu estis kontenta, escepte de tiuj, kiuj devis falĉi la herbon.

En Sud-kvarono la vitoj estis ŝarĝitaj, kaj la rikolto de “folioj” estis miriga; kaj ĉie kreskis tiom da greno, ke postrikolte ĉiu grentenejo estis plenŝtopita. La nord-kvarona hordeo estis tiel perfekta, ke la biero de la 1420a malto estis longe memorita kaj fariĝis proverbeca. Fakte post tuta generacio oni povis aŭdi oldulon en taverno, post pajnto da meritita biero,

demeti la kruĉon suspire: “Ha! Jen ĝuste la dudeka jaro, vere!”

Sam loĝis komence ĉe la Kotona familio kun Frodo; sed kiam la Nova Vico estis preta, li akompanis la Avulon. Aldone al siaj ceteraj laboroj li estris la purigadon kaj renovigon de Bag-Endo; sed li ofte vojaĝis en la Provinco pro siaj arbaraj taskoj. Do li ne estis hejme dum frua marto kaj ne sciis, ke Frodo estis malsana. La dek-trian de tiu monato bienulo Kotono trovis Frodon kuŝanta surlite; li kroĉis blankan gemon, kiu pendis per ĉeneto sur la kolo, kaj li ŝajnis duone sonĝanta.

— Ĝi estas forpasinta por ĉiam, — li diris, — kaj jam ĉio estas malluma kaj malplena.

Sed la malsano forpasis, kaj kiam Sam revenis la dudek-kvinan, Frodo estis sana kaj diris nenion pri si. Intertempe Bag-Endo estis ordigita, kaj Gaja kaj Grinĉjo alvenis el Stretkavo reportante ĉiujn malnovajn meblojn kaj ekipaĵojn, tiel ke la malnova truo aspektis pli-malpli kiel ĝi ĉiam aspektis.

Kiam ĉio finfine estis preta, Frodo diris:

— Kiam vi intencas transloĝiĝi por esti kun mi, Sam? — Sam aspektis iom embarasite.

— Ne necesas veni tuj, se vi ne deziras, — diris Frodo. — Sed vi scias, ke la Avulo estas proksime, kaj lin tre bone prizorgos vidvino Rumblo.

— Ne temas pri tio, sinjoro Frodo, — diris Sam kaj tre ruĝiĝis.

— Sed pri kio?

— Temas pri Rozinjo, Roza Kotono, — diris Sam. — Ŝajnis ke al ŝi tute ne plaĉis mia foriro, kompatindulinjo; sed pro tio, ke mi nenion deklaris al ŝi, tion ŝi ne povis diri. Kaj mi ne deklaris, ĉar unue mi havis taskon farendan. Sed jam mi deklaris, kaj ŝi diris: “Nu, vi malŝparis unu jaron, do kial plu prokrasti?”. “Ĉu malŝparis? — mi demandis. — Tion mi ne dirus”. Tamen, mi komprenas ŝian vidpunkton. Mi sentas min disduigita, por tiel diri.

— Mi komprenas, — diris Frodo: — vi deziras edziĝi, kaj tamen vi ankaŭ volas loĝi kun mi en Bag-Endo, ĉu? Sed mia kara Sam, kiel facilege! Edziĝu laŭeble baldaŭ, kaj poste enloĝiĝu kune kun Rozinjo ĉi tie. En Bag-Endo estas spaco sufiĉa por familio tiom granda, kiom vi povus deziri.

Kaj tiel estis aranĝite. Sam Vato edzinigis Rozinjon Kotono printempe de 1420 (tiu jaro estis fama pro siaj geedziĝoj), kaj ili venis loĝi en Bag-Endon. Kaj se Sam taksis sin feliĉa, Frodo sciis, ke li mem estas pli feliĉa; ĉar neniu hobito en la Provinco estis tiel bone prizorgata. Kiam ĉiuj riparaj laboroj estis planitaj kaj komencitaj, li ekvivis kvietan vivon, skribante tre multe kaj legante ĉiujn siajn notojn. Li rezignis pri la vicurbestra posteno ĉe tiusomera Libera Foiro, kaj kara maljuna Vilĉjo Blankpiedo prezidis la

bankedojn dum ankoraŭ sep pliaj jaroj.

Gaja kaj Grinĉjo kunloĝadis dum kelka tempo en Stretkavo, kaj okazis multe da irado-venado inter Boklando kaj Bag-Endo. La du junaj Vojaĝintoj multe paradis en la Provinco per siaj kantoj, kaj siaj rakontoj, kaj siaj belaj vestaĵoj, kaj siaj mirindaj festoj. “Majestaj” la popolo nomis ilin, celante nur laŭdi; ĉar varmigis la korojn vidi ilin preterrajdantaj en maŝkirasoj tiel belaj kaj ŝildoj tiel bravaj, ridantaj kaj kantantaj kantojn pri malproksimo; kaj kvankam ili estis nun grandaj kaj grandiozaj, ili estis cetere neŝanĝitaj, krom ke ili eble ja estis pli bonparolaj, jovialaj kaj ĝojplenaj ol antaŭe.

Frodo kaj Sam tamen denove vestis sin ordinare, krom ke laŭbezone ili ambaŭ surmetis longajn grizajn mantelojn, fajne teksitajn kaj agrafitajn ĉekole per belaj broĉoj; kaj sinjoro Frodo ĉiam portis blankan juvelon sur ĉeneto, kiun li ofte fingrumis.

Ĉio jam progresis bone, kun ĉiama espero pri plua pliboniĝo; kaj Sam estis tiom okupata kaj tiom ĝuplena, kiom eĉ hobito povis deziri. Por li nenio makulis tiun tutan jaron, escepte de ia svaga zorgo pri lia mastro. Frodo senemfaze liberigis sin de ĉiaj provincaj aferoj, kaj dolorigis Samon rimarki, kiom malmulte li estis honorata en la propra lando. Malmultaj sciis aŭ deziris scii pri liaj faroj kaj aventuroj; ili admiris kaj respektis ĉefe sinjoron Gajadoko kaj sinjoron Peregrino, kaj (se Sam scius tion) lin mem. Cetere, aŭtune aperis ombro de malnovaj ĉagrenoj.

Iun vesperon Sam eniris la kabineton kaj trovis sian mastron strange aspektanta. Li estis tre pala kaj liaj okuloj ŝajnis vidi forajn aferojn.

— Kio estas al vi, sinjoro Frodo? — diris Sam.

— Mi estas vundita, — li respondis, — vundita. Sed tio neniam komplete kuraciĝos.

Poste li stariĝis, kaj la humoro ŝajnis forpasi, kaj la postan tagon li estis tute normala. Nur poste Sam rememoris, ke estis la sesa de oktobro. En tiu tago antaŭ du jaroj estis mallume en la kavaĵo sur Veterverto.

La tempo pasis, kaj 1421 komenciĝis. Frodo denove malsanis en marto, sed per granda fortostreĉo li kaŝis tion, ĉar Sam havis aliajn aferojn pripensindajn. La unua el la infanoj de Sam kaj Rozinjo naskiĝis la dudek-kvinan de marto, dato, kiun Sam notis.

— Nu, sinjoro Frodo, — li diris. — Mi havas problemeton. Rozinjo kaj mi anticipe decidis nomi lin Frodo, kun via permeso; tamen estas ne *li*, sed *ŝi*. Tamen tiel ĉarma knabineto, kiel oni rajtus esperi, similanta Rozinjon pli ol min, feliĉe. Sed ni ne scias, kion ni faru.

— Nu, Sam, — diris Frodo, — kio misas pri la malnovaj moroj? Elektu flornomon, kia estas Rozo. Duono el la knabinetoj en la Provinco nomiĝas laŭ tiaj nomoj, kaj kio povus esti pli bona?

— Supozeble vi pravas, sinjoro Frodo, — diris Sam. — Mi aŭdis kelkajn belajn nomojn dum nia vojaĝado, sed supozeble tiuj estas iom tro pretendemaj por la ĉiutaga frotado, kiel oni povus diri. La Avulo diras: “Ĝi estu mallonga, kaj tiel vi ne devos malplilongigi ĝin antaŭ ol uzi ĝin”. Sed se ĝi estu flornomo, mi tiuokaze ne ĝenas min pri la longo: ĝi devos estis floro bela, ĉar, vidu, ŝi ŝajnas al mi tre bela, kaj ŝi estos ankoraŭ pli bela.

Frodo pensis momenton.

— Nu, Sam, kio pri *elanoro*, la sunstelo, ĉu vi memoras la etan oran floron en la herbo ĉe Lotlorieno?

— Denove vi pravas, sinjoro Frodo! — diris Sam ĝojigite. — Ĝuste tion mi volis.

Eta Elanora estis preskaŭ ses monatojn aĝa, kaj 1421 pasinta ĝis sia aŭtuno, kiam Frodo vokis Samon en la kabineton.

— Ĵaŭde estos la naskiĝdatreveno de Bilbo, Sam, — li diris. — Kaj li devancos la Maljunan Tjukon. Li estos cent-tridek-unu-jara!

— Tiel estas! — diris Sam. — Li estas mirinda!

— Nu, Sam, — diris Frodo, — mi deziras, ke vi interkonsiliĝu kun Rozinjo kaj trovu, ĉu ŝi povos malhavi vin, por ke vi kaj mi foriru kune. Vi jam ne povas iri tre malproksimen aŭ longedaŭre, kompreneble, — li diris iom sopireme.

— Nu, ne tre facile, sinjoro Frodo.

— Kompreneble ne. Sed negrave. Vi povos akompani min komence. Diru al Rozinjo, ke vi ne longe forestos, ne pli ol du semajnojn; kaj vi revenos tute sekure.

— Mi volus akompani vin la tutan vojon ĝis Rivendelo, sinjoro Frodo, kaj vidi sinjoron Bilbo, — diris Sam. — Kaj tamen ĉi tie estas la nura loko, kie mi vere deziras esti. Mi estas tute disduigita.

— Kompatinda Sam! Sentiĝos tiel, mi timas, — diris Frodo. — Sed vi kuraciĝos. Vi sortis esti solida kaj senmanka, kaj tia vi estos.

Dum postaj unu-du tagoj Frodo kontrolis kun Sam siajn paperojn kaj skribaĵojn, kaj li transdonis siajn ŝlosilojn. Troviĝis granda libro kun senornama ruĝa ledkovrilo; ties grandaj paĝoj estis jam preskaŭ plenigitaj. Ĉe la komenco estis multaj folioj kovritaj de la maldensa vaga manskribo de Bilbo; sed la plejparto estis verkita per la firma flua skribo de Frodo. Ĝi estis ĉapitre dividita, sed Ĉapitro 80 estis nefinita, kaj post ĝi estis kelkaj blankaj paĝoj. La titolpaĝo surhavis multajn titolojn, unu post alia forstrekitajn, do:

Mia Taglibro. Mia Neatendita Vojaĝo. Tien kaj Reen. Kaj Kio Okazis Poste. Aventuroj de Kvin Hobitoj. La Rakonto pri la Granda Ringo, kompilita de Bilbo Baginzo laŭ propra observado kaj la raportoj de liaj amikoj. Kion ni

faris dum la Milito de la Ringo.

Tie finiĝis la manskribo de Bilbo, kaj Frodo estis skribinta:

LA PEREO
DE LA MASTRO DE L' RINGOJ
KAJ LA REVENO DE LA REĜO

(Kiel spertis tion la Eta Popolo; ĉi tio estas la memoraĵoj de Bilbo kaj Frodo el la Provinco, kompletigitaj laŭ la raportoj de iliaj amikoj kaj la klero de la Saĝuloj.)

Kune kun eltiraĵoj el Libroj de Popolsaĝo, tradukitaj de Bilbo en Rivendelo.

— Vidu, vi preskaŭ finis ĝin, sinjoro Frodo! — Sam ekkriis. — Nu, vi vere obstinis pri ĝi, mi devas diri.

— Mi tute finis ĝin, Sam, — diris Frodo. — La restantaj paĝoj estas por vi.

La dudek-unuan de septembro ili ekvojaĝis kune, Frodo sur la poneo, kiu portis lin tutvoje el Minaso Tirit kaj nun nomiĝis Paŝegulo; kaj Sam sur sia amata Vilĉjo. La mateno estis bele ora, kaj Sam ne demandis, kien ili iros: al li ŝajnis, ke li povus diveni.

Ili ekiris laŭ la Stokvojo trans la montetojn kaj direktiĝis al Arbarfino, kaj ili lasis siajn poneojn paŝi laŭplaĉe. Ili bivakis en la Verdaj Montetoj, kaj la dudek-duan de septembro ili rajdis maiabrapte suben en la komenciĝon de la arboj dum la forveiko de la posttagmezo.

— Jen, ĉu ne, la arbo mem, post kiu vi kaŝis vin, kiam la Nigra Rajdanto aperis la unuan fojon, sinjoro Frodo! — diris Sam fingromontrante maldekstren. — Nun tio ŝajnas sonĝo.

Estis vespere, kaj la steloj briletis sur la orienta ĉielo kiam ili pasis la ruinan kverkon kaj turnis sin kaj pluiris suben inter la avelujaj densejoj. Sam silentis, profunde en siaj memoroj. Baldaŭ li ekrimarkis, ke Frodo kantas mallaŭte al si la malnovan marŝkanton, sed la vortoj ne estis tute samaj:

Atendas eble post vojorto
trovota pad', sekreta pordo;
kaj kvankam ofte iris mi ne,
alia tago venos fine
kaj mi vojetojn sekvos nun
inter la Luno kaj la Sun'.

Kaj kvazaŭ responde, el sube, alvenante laŭ la vojo el la valo, voĉoj kantis:

A! Elbereth Gilthoniel!
silivren penna míriel
o menel aglar elenath,
Gilthoniel, A! Elbereth!

Ni tenas en memorposedo,
en jena lando subarbara,
stellumon sur lontano Mara.

Frodo kaj Sam haltis kaj sidis silente en la mola ombraro, ĝis ili vidis muaron, kiam la vojaĝantoj proksimiĝis al ili.

ĉeestis Gildoro kaj multaj belaj elfoj; kaj tie mirigante Samon rajdis Elrondo kaj Galadriela. Elrondo surhavis mantelon grizan kaj sur lia frunto estis stelo, kaj en lia mano estis arĝenta harpo, kaj sur lia fingro estis ringo el oro kun granda blua juvelo, Vilja, la plej potenca el la Tri. Galadriela sidis sur blanka pordama ĉevaleto kaj estis ĉirkaŭvolvita en brileta blanko, kiel nuboj ĉirkaŭ la luno; ĉar ŝi mem ŝajnis brileti per mola lumo. Sur ŝia fingro estis Nenja, la ringo farita el *mitrilo*, kiu portis unu blankan gemon flagrantan kvazaŭ frosta stelo. Rajdante malrapide poste sur eta griza poneo, kaj ŝajnante kapklini dumdorme, estis Bilbo mem.

Elrondo salutis ilin gravmiene kaj favore, kaj Galadriela ridetis al ili.

— Nu, sinjoro Samsaĝo, — ŝi diris. — Mi aŭdas kaj vidas, ke vi bone utiligis mian donacon. La Provinco de nun estos eĉ pli ol iam benita kaj amata.

Sam riverencis, sed trovis nenion por diri. Li estis forgesinta, kiom bela estas la Damo.

Tiam Bilbo vekiĝis kaj malfermis siajn okulojn.

— Saluton, Frodo! — li diris. — Nu mi devancis hodiaŭ la Maljunan Tjukon! Do tio estas ordigita. Kaj nun ŝajnas al mi, ke mi estas tute preta ekiri alian vojaĝon. Ĉu vi kuniros?

— Jes, mi iros, — diris Frodo. — La Ringoportintoj devas iri kune.

— Kien vi iros, mastro? — kriis Sam, kvankam finfine li komprenis, kio okazas.

— Al la Havenoj, Sam, — diris Frodo.

— Kaj mi ne povos akompani.

— Ne, Sam. Almenaŭ, ne ankoraŭ, ne pli foren ol la Havenoj. Kvankam ankaŭ vi estis Ringoportanto, se nur mallonge. Via tempo eble venos. Ne tro malĝoju, Sam. Vi ne povas ĉiam disduiĝi. Vi devos esti unuopa kompleto, dum multaj jaroj. Vi havas tiom multe por ĝui kaj esti, kaj por fari.

— Sed, — diris Sam, kaj larmoj aperis en liaj okuloj, — mi supozis, ke ankaŭ vi ĝuos la Provincon dum jaroj kaj jaroj, post ĉio, kion vi faris.

— Ankaŭ mi iam tion supozis. Sed mi estas tro severe vundita, Sam. Mi provis savi la Provincon, kaj ĝi estas savita, sed ne por mi. Tre ofte tiel devas esti, Sam, kiam aferoj estas minacataj: iu devas rezigni pri ili, perdi ilin, por ke aliaj povu havi ilin. Sed vi estas mia heredanto: ĉion, kion mi posedis aŭ povis posedi, mi testamentas al vi. Kaj vi havas ankaŭ Rozinjon kaj Elanoran, kaj venos Frodo-knabo, kaj Roza-knabino, kaj Gaja, kaj Orhara, kaj Grinĉjo; kaj eble pli, kiujn mi ne povas vidi. Viaj manoj kaj via sprito estos ĉie bezonataj. Vi estos la Urbestro, kompreneble, tiel longe kiel vi deziros, kaj la plej fama ĝardenisto en la historio; kaj vi voĉlegos aferojn el la Ruĝa Libro, kaj tenos vivanta la memoron pri la foririnta epoko, tiel ke la popolo memoros la Grandan Danĝeron kaj tiel amos eĉ pli sian amatan landon. Kaj tio tiom okupos vin kaj feliĉigos vin, kiom feliĉa povas esti iu ajn, tiel longe kiel daŭros via parto de la Rakonto. Venu jam, rajdu kun mi!

Tiam Elrondo kaj Galadriela rajdis plu; ĉar la Tria Epoko finiĝis, kaj la tagoj de la Ringoj estis forpasintaj, kaj finiĝis la rakontoj kaj kantoj pri tiu epoko. Kun ili iris multaj elfoj el la Alta Parencaro kiuj ne plu volis resti en Mez-Tero; kaj inter ili, plenigitaj je malĝojo, kiu estis tamen benita kaj sen amaro, rajdis Sam, kaj Frodo, kaj Bilbo, kaj la elfoj ĝojis honori ilin.

Kvankam ili trarajdis la mezon de la Provinco tra la tuta vespero kaj tra la tuta nokto, neniu vidis ilin, krom sovaĝaj bestoj; aŭ ie-tie iu vaganto en la mallumo vidis ekbrileton sub la arboj, aŭ lumon kaj ombron fluantajn tra la herbo kiam la luno iris okcidenten. Kaj kiam ili jam forpasis el la Provinco, ĉirkaŭirinte la sudan randon de la Blankaj Suprejoj, ili alvenis la Distajn Deklivojn kaj al la Turegoj, kaj ekvidis la foran Maron; kaj tiel ili rajdis finfine suben al Mitlondo, al la Grizaj Havenoj en la longa Golfo de Ljuno.

Kiam ili venis al la pordo, Cirdano la ŝipkonstruisto elpaŝis por saluti ilin. Tre altstatura li estis, kaj lia barbo estis longa, kaj li estis griza kaj maljuna, krom ke liaj okuloj estis akraj kiel steloj; kaj li rigardis ilin kaj riverencis, kaj diris:

— Ĉio estas jam preta.

Poste Cirdano kondukis ilin al la Havenoj, kaj tie kuŝis blanka ŝipo, kaj sur la kajo staris figuro tute blankvestita, atendante ilin. Kiam li turniĝis kaj direktiĝis al ili, Frodo vidis, ke tiu estas Gandalfo; kaj sur sia mano li portis la Trian Ringon, Narjan la Grandan, kaj la gemo sur ĝi estis ruĝa kiel fajro. Tiam la forirontoj ĝojis, ĉar ili sciis, ke ankaŭ Gandalfo akompanos ilin sur la ŝipo.

Sed Sam nun estis kore malĝoja, kaj ŝajnis al li, ke, kvankam la disiĝo estos maldolĉa, tamen eĉ pli doloriga estos la longa vojo hejmen en solo. Sed ĝuste dum ili staris tie, kaj la elfoj surŝipiĝadis, kaj ĉio estis pretigata por foriro, alrajdis tre haste Gaja kaj Grinĉjo. Kaj inter siaj larmoj Grinĉjo

ridis.

— Vi provis eskapi de ni unu fojon pli frue kaj malsukcesis, Frodo, — li diris. — Ĉi-foje vi preskaŭ sukcesis, sed tamen denove malsukcesis. Ne estis Sam, tamen, kiu ĉi-foje perfidis vin, sed Gandalfo mem!

— Jes, — diris Gandalfo, — ĉar estos pli bone retrorajdi triope ol unuope. Nu, ĉi tie finfine, karaj amikoj, sur la bordoj de la maro venas la fino de nia kunuleco en Mez-Tero. Iru en paco! Mi ne diros: ne ploru; ĉar ne ĉiuj larmoj estas malbonaj.

Poste Frodo kisis Gajan kaj Grinĉjon, kaj laste Samon, kaj surŝipiĝis; kaj la veloj estis hisitaj, kaj la vento blovis, kaj malrapide la ŝipo forglisis laŭ la longa griza golfo; kaj la lumo de la vitro de Galadriela, kiun Frodo tenis, ekbrilis kaj malaperis. Kaj la ŝipo eliris sur la Altan Maron kaj forpasis okcidenten, ĝis finfine dum pluva nokto Frodo flaris dolĉan parfumon en la aero kaj aŭdis la sonon de kantado alvenanta trans la akvon. Kaj tiam ŝajnis al li, ke samkiel dum lia sonĝo en la domo de Bombadiljo, la griza pluvkurteno fariĝis arĝenta vitro kaj forruliĝis, kaj li vidis blankajn marbordojn kaj post ili foran verdan landon sub rapida sunleviĝo.

Sed laŭ Sam la vespero profunde mallumiĝis dum li staris ĉe la Haveno; kaj rigardante la grizan maron li vidis nur ombron sur la akvo baldaŭ perdiĝintan en la okcidento. Tiel li daŭre staris dum pasado de la nokto, aŭdante nur la suspiron kaj murmuradon de la ondoj sur la bordoj de Mez-Tero, kaj ties sono sinkis profunde en lian koron. Apud li staris Gaja kaj Grinĉjo, kaj ili estis silentaj.

Fine la tri kunuloj forturnis sin kaj, neniam plu retrorigardante, ili rajdis malrapide hejmen; kaj ili interŝanĝis neniun vorton ĝis ili revenis al la Provinco, sed ĉiun multe konsolis ĉeesto de la amikoj sur la longa griza vojo.

Fine ili rajdis trans la montetojn kaj laŭiris la Orientan Vojon, kaj poste Gaja kaj Grinĉjo plurajdis al Boklando; kaj jam denove ili kantis dumire. Sed Sam turnis sin al Apudakvo, kaj tiel revenis al la Monteto, kiam la tago denove finiĝis. Kaj li pluiris, kaj jen estis flava lumo, kaj fajro interne; kaj la vespermanĝo estis preta, kaj li estis atendita. Kaj Rozinjo entiris lin, kaj sidigis lin sur lian seĝon, kaj sidigis etan Elanoran sur lian sinon.

Li profunde enspiris:

— Nu, mi estas reveninta, — li diris.

Glosaro

Brasi. Bierfari; prepari trinkaĵojn (*ankaŭ figurasence*).

Ĉendi. Ekbruligi.

Leŭgo. Malnova mezurunuo de longo, varia laŭ landoj, proksimume tri mejloj, aŭ kvin kilometroj.

Scimitaro. Mallonga unueĝa kurba glavo pli larĝa ĉe la pinto.

Skrabli. Iri laŭ malorde barakta maniero; ekzemple, kiel skarabo, klopodanta eskapi el glaso.

Trampli. Surtreti.

Kelkaj vortoj en ĉi tiu traduko estas uzataj en senco pli vasta, ol (N)PIV kaj aliaj vortaroj rekomendas (ekzemple: *apika, brovumi, halo, kuratoro, plandi, preter, retro*). Atentigite pri tio ĉe la pretigado de la unua eldono, William Auld respondis, ke verkistoj kaj aliaj lingvouzantoj kreas la lingvon, kaj vortaristoj nur registras la uzadon. En la dua eldono la redaktoro kaj la prov-legantoj ŝanĝis nenion en ĉi tiu "devia" uzado, kritikita en kelkaj recenzoj aperintaj post la unua eldono.

Krome, en la libro estas pluraj vortoj (la nomoj de rasoj kaj popoloj, aliaj "realaĵoj"), kreitaj aŭ adaptitaj de Tolkien kaj tradukitaj de Auld.

1

Laŭ la analoj de Gondoro tiu estis Argelebo II, la dudeka el la Norda linio, kiu finiĝis ĉe Arveduo tricent jarojn poste.

2

Sekve, la jaroj de la Tria Epoko laŭ la kalkulado de la elfoj kaj la dunadanoj estas troveblaj per aldono de 1600 al la datoj de la Provinc-datumo.

3

Tradukis Bertilo Wennergren.

4

Vidu Apendicon B: analoj 1451, 1462, 1482; kaj noton ĉe la fino de Apendico C (en la angla eldono).

5

Redonita en tre reduktita formo en Apendico B ĝis la fino de la Tria Epoko (en la angla eldono).

6

Tradukis el la angla Bertilo Wennergren.

7

Tiel la hobitoj nomas la stelaron Plugilo aŭ Granda Urso.

8

Varda estas la nomo de tiu, kiun la elfoj en la ekzilaj landoj de Mez-Tero nomas Elbereta.

9

Ĉiu monato laŭ la Provinc-datumo estis 30-taga.

10

Traduko de Edmundo Grimley Evans.

11

Tark. Gondorano (orklingve). Tiu vorto devenis de *tarkil*, kiu en la Komuna Lingvo signifas numenoranon, venintan al Mez-Tero.

12

Laŭ la Provinca kalendaro estis tridek tagoj en *reteo* (t.e. en marto).

13

Probable ĝi originis de la orka vorto *ŝarkŭ*, kiu signifas *maljunulo*.

14

La Provinca kalendaro, krom dek du 30-tagaj monatoj, havis tritagan Lithon (inter junio kaj julio) kaj dutagan Julon — la jarfrua kaj jarkomenca tagoj (inter la 30ª de decembro kaj la 1ª de januaro).